# Holy Bible

## Aionian Edition®

### Esperanto London Bible

AionianBible.org
Unua inversa traduko de la Sankta Biblio en la mondo
100% senpage kopiebla kaj printebla
Ankaŭ konata kiel “ la Purpura Biblio ”

*Holy Bible Aionian Edition* ®
Esperanto London Bible

Creative Commons Attribution 4.0 International, 2018-2024
Source text: eBible.org
Source version: 8/25/2024
Source copyright: Public Domain
Ludvic Lazarus Zamenhof, British and Foreign Bible Society, 1910, 1926

Formatted by Speedata Publisher 4.19.20 (Pro) on 8/31/2024
100% Free to Copy and Print
TOR Anonymously
https://AionianBible.org

Published by Nainoia Inc
https://Nainoia-Inc.signedon.net

We pray for a modern Creative Commons translation in every language
Translator resources at https://AionianBible.org/Third-Party-Publisher-Resources
Report content and format concerns to Nainoia Inc
Volunteer help is welcome and appreciated!

*Celebrate Jesus Christ's victory of grace!*

# Antaŭparolo

Esperanto at AionianBible.org/Preface

The *Holy Bible Aionian Edition* ® is the world's first Bible *un-translation*! What is an *un-translation*? Bibles are translated into each of our languages from the original Hebrew, Aramaic, and Koine Greek. Occasionally, the best word translation cannot be found and these words are transliterated letter by letter. Four well known transliterations are *Christ*, *baptism*, *angel*, and *apostle*. The meaning is then preserved more accurately through context and a dictionary. The Aionian Bible un-translates and instead transliterates eleven additional Aionian Glossary words to help us better understand God's love for individuals and all mankind, and the nature of afterlife destinies.

The first three words are *aiōn*, *aiōnios*, and *aïdios*, typically translated as *eternal* and also *world* or *eon*. The Aionian Bible is named after an alternative spelling of *aiōnios*. Consider that researchers question if *aiōn* and *aiōnios* actually mean *eternal*. Translating *aiōn* as *eternal* in Matthew 28:20 makes no sense, as all agree. The Greek word for *eternal* is *aïdios*, used in Romans 1:20 about God and in Jude 6 about demon imprisonment. Yet what about *aiōnios* in John 3:16? Certainly we do not question whether salvation is eternal! However, *aiōnios* means something much more wonderful than infinite time! Ancient Greeks used *aiōn* to mean *eon* or *age*. They also used the adjective *aiōnios* to mean *entirety*, such as *complete* or even *consummate*, but never infinite time. Read Dr. Heleen Keizer and Ramelli and Konstan for proofs. So *aiōnios* is the perfect description of God's Word which has *everything* we need for life and godliness! And the *aiōnios* life promised in John 3:16 is not simply a ticket to eternal life in the future, but the invitation through faith to the *consummate* life beginning now!

The next seven words are *Sheol*, *Hadēs*, *Geenna*, *Tartaroō*, *Abyssos*, and *Limnē Pyr*. These words are often translated as *Hell*, the place of eternal punishment. However, *Hell* is ill-defined when compared with the Hebrew and Greek. For example, *Sheol* is the abode of deceased believers and unbelievers and should never be translated as *Hell*. *Hadēs* is a temporary place of punishment, Revelation 20:13-14. *Geenna* is the Valley of Hinnom, Jerusalem's refuse dump, a temporal judgment for sin. *Tartaroō* is a prison for demons, mentioned once in 2 Peter 2:4. *Abyssos* is a temporary prison for the Beast and Satan. Translators are also inconsistent because *Hell* is used by the King James Version 54 times, the New International Version 14 times, and the World English Bible zero times. Finally, *Limnē Pyr* is the Lake of Fire, yet Matthew 25:41 explains that these fires are prepared for the Devil and his angels. So there is reason to review our conclusions about the destinies of redeemed mankind and fallen angels.

The eleventh word, *eleēsē*, reveals the grand conclusion of grace in Romans 11:32. Take the time to understand these eleven words. The original translation is unaltered and a note is added to 64 Old Testament and 200 New Testament verses. To help parallel study and Strong's Concordance use, apocryphal text is removed and most variant verse numbering is mapped to the English standard. We thank our sources at eBible.org, Crosswire.org, unbound.Biola.edu, Bible4u.net, and NHEB.net. The Aionian Bible is copyrighted with creativecommons.org/licenses/by/4.0, allowing 100% freedom to copy and print, if respecting source copyrights. Check the Reader's Guide and read online at AionianBible.org, with Android, and TOR network. Why purple? King Jesus' Word is royal… and purple is the color of royalty!

# History

Esperanto at AionianBible.org/History

04/15/85 - Aionian Bible conceived as B. and J. pray.
12/18/13 - Aionian Bible announced as J. and J. pray.
06/21/15 - Aionian Bible birthed as G. and J. pray.
01/11/16 - AionianBible.org domain registered.
06/21/16 - 30 translations available in 12 languages.
12/07/16 - Nainoia Inc established as non-profit corporation.
01/01/17 - Creative Commons Attribution No Derivatives 4.0 license added.
01/16/17 - Aionian Bible Google Play Store App published.
07/01/17 - 'The Purple Bible' nickname begins.
07/30/17 - 42 translations now available in 22 languages.
02/01/18 - Holy Bible Aionian Edition® trademark registered.
03/06/18 - Aionian Bibles available in print at Amazon.com.
10/20/18 - 70 translations now available in 33 languages.
11/17/18 - 104 translations now available in 57 languages.
03/24/19 - 135 translations now available in 67 languages.
10/28/19 - Aionian Bible nursed as J. and J. pray.
10/31/19 - 174 translations now available in 74 languages.
02/22/20 - Aionian Bibles available in print at Lulu.com.
05/25/20 - Illustrations by Gustave Doré, La Grande Bible de Tours, Felix Just.
08/29/20 - Aionian Bibles now available in ePub format.
12/01/20 - Right to left and Hindic languages now available in PDF format.
03/31/21 - 214 translations now available in 99 languages.
11/17/21 - Aionian Bible Branded Leather Bible Covers now available.
12/20/21 - Social media presence on Facebook, Twitter, LinkedIn, YouTube, etc.
01/01/22 - 216 translations now available in 99 languages.
01/09/22 - StudyPack resources for Bible translation study.
02/14/22 - Strong's Concordance from Open Scriptures and STEPBible.
02/14/23 - Aionian Bible published on the TOR Network.
12/04/23 - Eleēsē added to the Aionian Glossary.
02/04/24 - 352 translations now available in 142 languages.
05/01/24 - 370 translations now available in 164 languages.
08/05/24 - 377 translations now available in 166 languages.
08/18/24 - Creative Commons Attribution 4.0 International, if source allows.

# Enhavtabelo

MALNOVA TESTAMENTO


Genezo ........ 11
Eliro ........ 49
Levidoj ........ 81
Nombroj ........ 105
Readmono ........ 137
Josuo ........ 165
Juĝistoj ........ 184
Rut ........ 203
1 Samuel ........ 206
2 Samuel ........ 231
1 Reĝoj ........ 252
2 Reĝoj ........ 277
1 Kroniko ........ 300
2 Kroniko ........ 321
Ezra ........ 347
Neĥemja ........ 355
Ester ........ 366
Ijob ........ 372
Psalmaro ........ 391
Sentencoj ........ 436
Predikanto ........ 452
Alt Kanto ........ 458
Jesaja ........ 461
Jeremia ........ 497
Plorkanto ........ 539
Jeĥezkel ........ 543
Daniel ........ 582
Hoŝea ........ 594
Joel ........ 600
Amos ........ 602
Obadja ........ 607
Jona ........ 608
Miĥa ........ 610
Naĥum ........ 613
Ĥabakuk ........ 615
Cefanja ........ 617
Ĥagaj ........ 619
Zeĥarja ........ 621
Malaĥi ........ 628



NOVA TESTAMENTO


Mateo ........ 633
Marko ........ 657
Luko ........ 672
Johano ........ 697
Agoj ........ 716
Romanoj ........ 741
1 Korintanoj ........ 751
2 Korintanoj ........ 761
Galatoj ........ 768
Efesanoj ........ 772
Filipianoj ........ 776
Koloseanoj ........ 779
1 Tesalonikanoj ........ 782
2 Tesalonikanoj ........ 784
1 Timoteo ........ 786
2 Timoteo ........ 789
Tito ........ 791
Filemon ........ 793
Hebroj ........ 794
Jakobo ........ 801
1 Petro ........ 804
2 Petro ........ 807
1 Johano ........ 809
2 Johano ........ 812
3 Johano ........ 813
Judas ........ 814
Apokalipso ........ 815


**APENDICO**


Gvidilo por Legantoj
Glosaro
Mapoj
Destino
Ilustraĵoj, Doré

# MALNOVA TESTAMENTO




*Kaj Li elpelis Adamon, kaj lokis antaŭ la Edena ĝardeno la kerubon kaj la turniĝantan flaman glavon, por gardi la vojon al la arbo de vivo.*

Genezo 3:24

# Genezo

1 En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron. 2
Kaj la tero estis senforma kaj dezerta, kaj mallumo
estis super la abismo; kaj la spirito de Dio ŝvebis super
la akvo. 3 Kaj Dio diris: Estu lumo; kaj fariĝis lumo.
4 Kaj Dio vidis la lumon, ke ĝi estas bona; kaj Dio
apartigis la lumon de la mallumo. 5 Kaj Dio nomis
la lumon Tago, kaj la mallumon Li nomis Nokto. Kaj
estis vespero, kaj estis mateno, unu tago. 6 Kaj Dio
diris: Estu firmaĵo inter la akvo, kaj ĝi apartigu akvon
de akvo. 7 Kaj Dio kreis la firmaĵon, kaj apartigis la
akvon, kiu estas sub la firmaĵo, de la akvo, kiu estas
super la firmaĵo; kaj fariĝis tiel. 8 Kaj Dio nomis la
firmaĵon Ĉielo. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la
dua tago. 9 Kaj Dio diris: Kolektiĝu la akvo de sub la
ĉielo en unu lokon, kaj aperu la sekaĵo; kaj fariĝis tiel.
10 Kaj Dio nomis la sekaĵon Tero, kaj la kolektiĝojn de
la akvo Li nomis Maroj. Kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona.
11 Kaj Dio diris: Kreskigu la tero verdaĵon, herbon, kiu
naskas semon, fruktarbon, kiu donas laŭ sia speco
frukton, kies semo estas en ĝi mem, sur la tero; kaj
fariĝis tiel. 12 Kaj la tero elkreskigis verdaĵon, herbon,
kiu naskas semon laŭ sia speco, kaj arbon, kiu donas
frukton, kies semo estas en ĝi mem laŭ sia speco.
Kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona. 13 Kaj estis vespero,
kaj estis mateno, la tria tago. 14 Kaj Dio diris: Estu
lumaĵoj en la ĉiela firmaĵo, por apartigi la tagon de la
nokto, kaj ili prezentu signojn, tempojn, tagojn, kaj
jarojn; 15 kaj ili estu lumaĵoj en la ĉiela firmaĵo, por
lumi super la tero; kaj fariĝis tiel. 16 Kaj Dio faris la
du grandajn lumaĵojn: la pli grandan lumaĵon, por
regi la tagon, kaj la malpli grandan lumaĵon, por regi
la noktoon, kaj la stelojn. 17 Kaj Dio starigis ilin sur la
ĉiela firmaĵo, por ke ili lumu sur la teron, 18 kaj por
ke ili regu la tagon kaj la nokton kaj faru diferencon
inter la lumo kaj la mallumo. Kaj Dio vidis, ke ĝi estas
bona. 19 Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la kvara
tago. 20 Kaj Dio diris: La akvo aperigu moviĝantaĵojn,
vivajn estaĵojn, kaj birdoj ekflugu super la tero, sub la
ĉiela firmaĵo. 21 Kaj Dio kreis la grandajn balenojn,
kaj ĉiujn vivajn estaĵojn moviĝantajn, kiujn aperigis la
akvo, laŭ ilia speco, kaj ĉiujn flugilhavajn birdojn laŭ
ilia speco. Kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona. 22 Kaj Dio
ilin benis, dirante: Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la
akvon en la maroj, kaj la birdoj multiĝu sur la tero. 23
Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la kvina tago. 24
Kaj Dio diris: La tero aperigu vivajn estaĵojn, laŭ ilia
speco, brutojn kaj rampaĵojn kaj surterajn bestojn, laŭ
ilia speco; kaj fariĝis tiel. 25 Kaj Dio kreis la bestojn de
la tero, laŭ ilia speco, kaj la brutojn, laŭ ilia speco, kaj
ĉiujn rampaĵojn de la tero, laŭ ilia speco. Kaj Dio vidis,
ke ĝi estas bona. 26 Kaj Dio diris: Ni kreu homon laŭ
Nia bildo, similan al Ni; kaj ili regu super la fiŝoj de la
maro kaj super la birdoj de la ĉielo kaj super la brutoj,
kaj super ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero. 27
Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de
Dio Li kreis lin; en formo de viro kaj virino Li kreis
ilin. 28 Kaj Dio benis ilin, kaj Dio diris al ili: Fruktu kaj
multiĝu, kaj plenigu la teron kaj submetu ĝin al vi,
kaj regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj
de la ĉielo, kaj super ĉiuj bestoj, kiuj moviĝas sur la
tero. 29 Kaj Dio diris: Jen Mi donis al vi ĉiujn herbojn,
kiuj semas semon, kiuj troviĝas sur la tuta tero, kaj
ĉiujn arbojn, kiuj havas en si arban frukton, kiu semas
semon; tio estu por vi manĝaĵo. 30 Kaj al ĉiuj bestoj de
la tero kaj al ĉiuj birdoj de la ĉielo kaj al ĉiuj rampaĵoj
sur la tero, kiuj havas en si vivan animon, la tutan
verdan herbaĵon kiel manĝaĵon. Kaj fariĝis tiel. 31 Kaj
Dio rigardis ĉion, kion Li kreis, kaj vidis, ke ĝi estas tre
bona. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la sesa tago.

2 Kaj estis finitaj la ĉielo kaj la tero kaj ĉiuj iliaj
apartenaĵoj. 2 Kaj Dio finis en la sepa tago Sian
laboron, kiun Li faris, kaj Li ripozis en la sepa tago
de la tuta laboro, kiun Li faris. 3 Kaj Dio benis la
sepan tagon kaj sanktigis ĝin, ĉar en ĝi Li ripozis de
Sia tuta laboro, kiun Li faris kreante. 4 Tia estas la
naskiĝo de la ĉielo kaj la tero, kiam ili estis kreitaj,
kiam Dio la Eternulo faris la teron kaj la ĉielon. 5
Kaj nenia kampa arbetaĵo ankoraŭ estis sur la tero,
kaj nenia kampa herbo ankoraŭ kreskis, ĉar Dio la
Eternulo ne pluvigis sur la teron, kaj ne ekzistis homo,
por prilabori la teron. 6 Sed nebulo leviĝadis de la
tero kaj donadis malsekecon al la tuta supraĵo de la
tero. 7 Kaj Dio la Eternulo kreis la homon el polvo
de la tero, kaj Li enblovis en lian nazon spiron de
vivo, kaj la homo fariĝis viva animo. 8 Kaj Dio la
Eternulo plantis ĝardenon en Eden en la Oriento, kaj
Li metis tien la homon, kiun Li kreis. 9 Kaj Dio la
Eternulo elkreskigis el la tero ĉiun arbon ĉarman por
la vido kaj bonan por la manĝo, kaj la arbon de vivo
en la mezo de la ĝardeno, kaj la arbon de sciado pri
bono kaj malbono. 10 Kaj rivero eliras el Eden, por

akvoprovizi la ĝardenon, kaj de tie ĝi dividiĝas kaj
fariĝas kvar ĉefpartoj. 11 La nomo de unu estas Piŝon;
ĝi estas tiu, kiu ĉirkaŭas la tutan landon Ĥavila, kie
estas la oro. 12 Kaj la oro de tiu lando estas bona; tie
troviĝas bedelio kaj la ŝtono onikso. 13 Kaj la nomo de
la dua rivero estas Giĥon; ĝi estas tiu, kiu ĉirkaŭas la
tutan landon Etiopujo. 14 Kaj la nomo de la tria rivero
estas Ĥidekel; ĝi estas tiu, kiu fluas antaŭ Asirio. Kaj
la kvara rivero estas Eŭfrato. 15 Kaj Dio la Eternulo
prenis la homon kaj enloĝigis lin en la ĝardeno Edena,
por ke li prilaboradu ĝin kaj gardu ĝin. 16 Kaj Dio la
Eternulo ordonis al la homo, dirante: De ĉiu arbo de
la ĝardeno vi manĝu; 17 sed de la arbo de sciado pri
bono kaj malbono vi ne manĝu, ĉar en la tago, en
kiu vi manĝos de ĝi, vi mortos. 18 Kaj Dio la Eternulo
diris: Ne estas bone, ke la homo estu sola; Mi kreos
al li helpanton similan al li. 19 Kaj Dio la Eternulo
kreis el la tero ĉiujn bestojn de la kampo kaj ĉiujn
birdojn de la ĉielo, kaj venigis ilin al la homo, por
vidi, kiel li nomos ilin; kaj kiel la homo nomis ĉiun
vivan estaĵon, tiel restis ĝia nomo. 20 Kaj la homo
donis nomojn al ĉiuj brutoj kaj al la birdoj de la ĉielo
kaj al ĉiuj bestoj de la kampo; sed por la homo ne
troviĝis helpanto simila al li. 21 Kaj Dio la Eternulo
faligis profundan dormon sur la homon, kaj ĉi tiu
endormiĝis; kaj Li prenis unu el liaj ripoj kaj fermis
la lokon per karno. 22 Kaj Dio la Eternulo konstruis
el la ripo, kiun Li prenis de la homo, virinon, kaj Li
venigis ŝin al la homo. 23 Kaj la homo diris: Jen nun ŝi
estas osto el miaj ostoj kaj karno el mia karno; ŝi estu
nomata Virino, ĉar el Viro ŝi estas prenita. 24 Tial
viro forlasos sian patron kaj sian patrinon, kaj aliĝos
al sia edzino, kaj ili estos unu karno. 25 Kaj ili ambaŭ
estis nudaj, la homo kaj lia edzino, kaj ili ne hontis.

**3** Kaj la serpento estis pli ruza, ol ĉiuj kampaj bestoj,
kiujn kreis Dio la Eternulo. Kaj ĝi diris al la virino:
Ĉu Dio diris, ke vi ne manĝu de ĉiuj arboj de la
ĝardeno? 2 Kaj la virino diris al la serpento: La
fruktojn de la arboj de la ĝardeno ni povas manĝi; 3
sed pri la fruktoj de la arbo, kiu estas en la mezo de la
ĝardeno, Dio diris: Ne manĝu ion de ili kaj ne tuŝu
ilin, por ke vi ne mortu. 4 Kaj la serpento diris al la
virino: Ne, vi ne mortos; 5 sed Dio scias, ke en la tago,
en kiu vi manĝos ion de ili, malfermiĝos viaj okuloj
kaj vi estos kiel Dio, vi scios bonon kaj malbonon. 6
Kaj la virino vidis, ke la arbo estas bona por manĝi
kaj ĝi estas ĉarma por la okuloj, kaj la arbo estas
dezirinda por saĝiĝi; kaj ŝi prenis de ĝiaj fruktoj, kaj
ŝi manĝis, kaj ŝi donis kune ankaŭ al sia edzo, kaj li
manĝis. 7 Kaj malfermiĝis la okuloj de ili ambaŭ, kaj
ili sciiĝis, ke ili estas nudaj; kaj ili kunkudris foliojn
de figarbo kaj faris al si zonaĵojn. 8 Kaj ili aŭdis la
voĉon de Dio la Eternulo, kiu marŝis en la ĝardeno
dum la malvarmeto de la tago; kaj Adam kaj lia edzino
kaŝiĝis de Dio la Eternulo inter la arboj de la ĝardeno.
9 Kaj Dio la Eternulo vokis Adamon, kaj diris al li: Kie
vi estas? 10 Kaj tiu diris: Vian voĉon mi aŭdis en la
ĝardeno, kaj mi ektimis, ĉar mi estas nuda; kaj mi
kaŝis min. 11 Kaj Dio diris: Kiu diris al vi, ke vi estas
nuda? ĉu vi ne manĝis de la arbo, pri kiu Mi ordonis al
vi, ke vi ne manĝu de ĝi? 12 Kaj Adam diris: La edzino,
kiun Vi donis al mi kiel kunulinon, ŝi donis al mi de
la arbo, kaj mi manĝis. 13 Kaj Dio la Eternulo diris
al la virino: Kial vi tion faris? Kaj la virino diris: La
serpento tromplogis min, kaj mi manĝis. 14 Kaj Dio la
Eternulo diris al la serpento: Ĉar vi tion faris, tial estu
malbenita inter ĉiuj brutoj kaj inter ĉiuj bestoj de la
kampo; sur via ventro vi irados kaj teron vi manĝados
dum via tuta vivo. 15 Kaj Mi metos malamikecon inter
vi kaj la virino kaj inter via idaro kaj ŝia idaro; ĝi
frapados vian kapon, kaj vi pikados ĝian kalkanon. 16
Al la virino Li diris: Mi multigos viajn suferojn dum
via gravedeco; en doloro vi naskados infanojn; kaj al
via viro vi vin tiros, kaj li regos super vi. 17 Kaj al
Adam Li diris: Ĉar vi obeis la voĉon de via edzino, kaj
vi manĝis de la arbo, pri kiu Mi ordonis al vi, dirante,
ke vi ne manĝu de ĝi, tial malbenita estu la tero pro
vi; kun suferoj vi manĝados de ĝi dum via tuta vivo.
18 Kaj dornojn kaj pikaĵojn ĝi kreskigos por vi, kaj
vi manĝados herbojn de la kampo. 19 En la ŝvito de
via vizaĝo vi manĝados panon, ĝis vi revenos en la
teron, el kiu vi estas prenita; ĉar vi estas polvo kaj
refariĝos polvo. 20 Kaj Adam donis al sia edzino la
nomon Eva, ĉar ŝi estis patrino de ĉiuj vivantoj. 21
Kaj Dio la Eternulo faris por Adam kaj por lia edzino
vestojn el felo, kaj Li vestis ilin. 22 Kaj Dio la Eternulo
diris: Jen Adam fariĝis kiel unu el Ni, sciante bonon
kaj malbonon; nun eble li etendos sian manon kaj
prenos ankaŭ de la arbo de vivo kaj manĝos kaj vivos
eterne. 23 Kaj Dio la Eternulo eligis lin el la Edena
ĝardeno, por ke li prilaboradu la teron, el kiu li estis
prenita. 24 Kaj Li elpelis Adamon, kaj lokis antaŭ la

Edena ĝardeno la kerubon kaj la turniĝantan flaman
glavon, por gardi la vojon al la arbo de vivo.

**4** Kaj Adam ekkonis Evan, sian edzinon, kaj ŝi
gravediĝis, kaj ŝi naskis Kainon; kaj ŝi diris: Mi
akiris homon de la Eternulo. 2 Kaj plue ŝi naskis lian
fraton Habel. Kaj Habel fariĝis ŝafpaŝtisto, kaj Kain
fariĝis terlaboristo. 3 Kaj post ia tempo fariĝis, ke
Kain alportis el la fruktoj de la tero donacoferon al la
Eternulo. 4 Kaj Habel ankaŭ alportis el la unuenaskitoj
de siaj ŝafoj kaj el ilia graso. Kaj la Eternulo atentis
Habelon kaj lian donacoferon; 5 sed Kainon kaj lian
donacoferon Li ne atentis. Kaj Kain tre ekkoleris, kaj
lia vizaĝo kliniĝis. 6 Kaj la Eternulo diris al Kain: Kial
vi koleras? kaj kial kliniĝis via vizaĝo? 7 Ja se vi agos
bone, vi estos forta; sed se vi agos malbone, la peko
kuŝos ĉe la pordo, kaj vin ĝi aspiros, sed vi regu super
ĝi. 8 Kaj Kain parolis kun sia frato Habel; kaj kiam ili
estis sur la kampo, Kain leviĝis kontraŭ sian fraton
Habel kaj mortigis lin. 9 Kaj la Eternulo diris al Kain:
Kie estas via frato Habel? Kaj tiu diris: Mi ne scias; ĉu
mi estas gardisto de mia frato? 10 Kaj Li diris: Kion
vi faris? la voĉo de la sango de via frato krias al Mi
de la tero. 11 Kaj nun estu malbenita de sur la tero,
kiu malfermis sian buŝon, por preni la sangon de via
frato el via mano. 12 Kiam vi prilaboros la teron, ĝi ne
plu donos al vi sian forton; vaganto kaj forkuranto vi
estos sur la tero. 13 Kaj Kain diris al la Eternulo: Pli
granda estas mia puno, ol kiom mi povos elporti. 14
Jen Vi forpelas min hodiaŭ de sur la tero, kaj mi devas
min kaŝi de antaŭ Via vizaĝo, kaj mi estos vaganto kaj
forkuranto sur la tero, kaj iu ajn, kiu min renkontos,
mortigos min. 15 Kaj la Eternulo diris al li: Sciu, ke al
iu, kiu mortigos Kainon, estos venĝite sepoble. Kaj
la Eternulo faris sur Kain signon, ke ne mortigu lin
iu, kiu lin renkontos. 16 Kaj Kain foriris de antaŭ la
Eternulo, kaj loĝiĝis en la lando Nod, oriente de Eden.
17 Kaj Kain ekkonis sian edzinon, kaj ŝi gravediĝis, kaj
ŝi naskis Ĥanoĥon. Kaj li konstruis urbon, kaj li donis
al la urbo nomon laŭ la nomo de sia filo: Ĥanoĥ. 18 Kaj
al Ĥanoĥ naskiĝis Irad, kaj al Irad naskiĝis Meĥujael,
kaj al Meĥujael naskiĝis Metuŝael, kaj al Metuŝael
naskiĝis Lemeĥ. 19 Kaj Lemeĥ prenis al si du edzinojn:
unu havis la nomon Ada, kaj la dua havis la nomon
Cila. 20 Kaj Ada naskis Jabalon; li estis la patro de tiuj,
kiuj loĝas en tendoj kaj paŝtas brutojn. 21 Kaj la nomo
de lia frato estis Jubal; li estis la patro de ĉiuj, kiuj
ludas harpon kaj fluton. 22 Cila ankaŭ naskis Tubal-
Kainon, forĝanton de diversaj majstraĵoj el kupro kaj
fero. Kaj la fratino de Tubal-Kain estis Naama. 23 Kaj
Lemeĥ diris al siaj edzinoj Ada kaj Cila: Aŭskultu mian
voĉon, edzinoj de Lemeĥ, Atentu mian parolon! Ĉar
viron mi mortigis por vundo al mi Kaj junulon por
tubero al mi; 24 Se sepoble estos venĝite por Kain,
Por Lemeĥ estos sepdek-sepoble. 25 Kaj denove Adam
ekkonis sian edzinon, kaj ŝi naskis filon, kaj donis
al li la nomon Set: Ĉar Dio metis al mi alian semon
anstataŭ Habel, kiun mortigis Kain. 26 Kaj al Set ankaŭ
naskiĝis filo, kaj li donis al li la nomon Enoŝ. Tiam oni
komencis alvokadi la nomon de la Eternulo.

**5** Jen estas la libro de naskoj de Adam. Kiam Dio kreis
la homon, Li faris lin laŭ la bildo de Dio; 2 kiel viron
kaj virinon Li kreis ilin, kaj Li benis ilin kaj donis al ili
la nomon Homo en la tago de ilia naskiĝo. 3 Kaj Adam
vivis cent tridek jarojn, kaj al li naskiĝis filo laŭ lia
bildo kaj simileco, kaj li donis al li la nomon Set. 4 Kaj
Adam vivis, post kiam naskiĝis al li Set, okcent jarojn,
kaj naskiĝis al li filoj kaj filinoj. 5 Kaj la tuta vivo,
kiun travivis Adam, estis naŭcent tridek jaroj, kaj li
mortis. 6 Kaj Set vivis cent kvin jarojn, kaj naskiĝis al
li Enoŝ. 7 Kaj Set vivis, post kiam naskiĝis al li Enoŝ,
okcent sep jarojn, kaj naskiĝis al li filoj kaj filinoj. 8
Kaj la tuta vivo de Set estis naŭcent dek du jaroj, kaj li
mortis. 9 Kaj Enoŝ vivis naŭdek jarojn, kaj naskiĝis al
li Kenan. 10 Kaj Enoŝ vivis, post kiam naskiĝis al li
Kenan, okcent dek kvin jarojn, kaj naskiĝis al li filoj
kaj filinoj. 11 Kaj la tuta vivo de Enoŝ estis naŭcent
kvin jaroj, kaj li mortis. 12 Kaj Kenan vivis sepdek
jarojn, kaj naskiĝis al li Mahalalel. 13 Kaj Kenan vivis,
post kiam naskiĝis al li Mahalalel, okcent kvardek
jarojn, kaj naskiĝis al li filoj kaj filinoj. 14 Kaj la tuta
vivo de Kenan estis naŭcent dek jaroj, kaj li mortis. 15
Kaj Mahalalel vivis sesdek kvin jarojn, kaj naskiĝis al
li Jared. 16 Kaj Mahalalel vivis, post kiam naskiĝis al li
Jared, okcent tridek jarojn, kaj naskiĝis al li filoj kaj
filinoj. 17 Kaj la tuta vivo de Mahalalel estis okcent
naŭdek kvin jaroj, kaj li mortis. 18 Kaj Jared vivis cent
sesdek du jarojn, kaj naskiĝis al li Ĥanoĥ. 19 Kaj Jared
vivis, post kiam naskiĝis al li Ĥanoĥ, okcent jarojn,
kaj naskiĝis al li filoj kaj filinoj. 20 Kaj la tuta vivo de
Jared estis naŭcent sesdek du jaroj, kaj li mortis. 21
Kaj Ĥanoĥ vivis sesdek kvin jarojn, kaj naskiĝis al li
Metuŝelaĥ. 22 Kaj Ĥanoĥ iradis kun Dio, post kiam

naskiĝis al li Metuŝelaĥ, tricent jarojn, kaj naskiĝis al
li filoj kaj filinoj. 23 Kaj la tuta vivo de Ĥanoĥ estis
tricent sesdek kvin jaroj. 24 Kaj Ĥanoĥ iradis kun Dio;
kaj li malaperis, ĉar Dio lin prenis. 25 Kaj Metuŝelaĥ
vivis cent okdek sep jarojn, kaj naskiĝis al li Lemeĥ.
26 Kaj Metuŝelaĥ vivis, post kiam naskiĝis al li Lemeĥ,
sepcent okdek du jarojn, kaj naskiĝis al li filoj kaj
filinoj. 27 Kaj la tuta vivo de Metuŝelaĥ estis naŭcent
sesdek naŭ jaroj, kaj li mortis. 28 Kaj Lemeĥ vivis cent
okdek du jarojn, kaj naskiĝis al li filo. 29 Kaj li donis
al li la nomon Noa, dirante: Ĉi tiu konsolos nin en
niaj faroj kaj en la laboroj de niaj manoj sur la tero,
kiun la Eternulo malbenis. 30 Kaj Lemeĥ vivis, post
kiam naskiĝis al li Noa, kvincent naŭdek kvin jarojn,
kaj naskiĝis al li filoj kaj filinoj. 31 Kaj la tuta vivo de
Lemeĥ estis sepcent sepdek sep jaroj, kaj li mortis. 32
Kaj Noa havis la aĝon de kvincent jaroj, kaj al Noa
naskiĝis Ŝem, Ĥam, kaj Jafet.

**6** Kaj kiam la homoj komencis multiĝi sur la tero kaj
al ili naskiĝis filinoj, 2 tiam la filoj de Dio vidis la
filinojn de la homoj, ke ili estas belaj; kaj ili prenis al
si edzinojn el ĉiuj, kiujn ili elektis. 3 Kaj la Eternulo
diris: Ne regos Mia spirito inter la homoj eterne, pro
iliaj pekoj, ĉar ili estas karno; ilia vivo estu cent dudek
jaroj. 4 Gigantoj estis sur la tero en tiu tempo, eĉ post
kiam la filoj de Dio venis al la filinoj de la homoj kaj
ĉi tiuj naskis al ili. Tio estis la fortuloj, tre famaj de
plej antikva tempo. 5 Kaj la Eternulo vidis, ke granda
estas la malboneco de la homoj sur la tero kaj ke ĉiuj
pensoj kaj intencoj de iliaj koroj estas nur malbono
en ĉiu tempo; 6 tiam la Eternulo pentis, ke Li kreis
la homon sur la tero, kaj Li afliktiĝis en Sia koro. 7
Kaj la Eternulo diris: Mi ekstermos de sur la tero la
homon, kiun Mi kreis, de la homo ĝis la brutoj, ĝis la
rampaĵoj, kaj ĝis la birdoj de la ĉielo; ĉar Mi pentas,
ke Mi ilin kreis. 8 Sed Noa akiris plaĉon en la okuloj
de la Eternulo. 9 Jen estas la historio de Noa: Noa
estis homo virta kaj senmakula en sia generacio; kun
Dio Noa iradis. 10 Kaj naskiĝis al Noa tri filoj: Ŝem,
Ĥam, kaj Jafet. 11 Kaj la tero malvirtiĝis antaŭ Dio,
kaj la tero pleniĝis de maljustaĵoj. 12 Kaj Dio vidis
la teron, ke ĝi malvirtiĝis, ĉar ĉiu karno malvirtigis
sian vojon sur la tero. 13 Kaj Dio diris al Noa: La fino
de ĉiu karno venis antaŭ Min, ĉar la tero pleniĝis de
maljustaĵoj per ili, kaj jen Mi pereigos ilin kun la tero.
14 Faru al vi arkeon el ligno gofera; apartaĵojn faru en
la arkeo, kaj ŝmiru ĝin per peĉo interne kaj ekstere.
15 Kaj faru ĝin tiamaniere: tricent ulnoj estu la longo
de la arkeo, kvindek ulnoj ĝia larĝo, kaj tridek ulnoj
ĝia alto. 16 Fenestron faru en la arkeo, supre, kun la
alto de unu ulno, kaj la pordon de la arkeo vi faros en
la flanko; malsupran spacon, duan spacon, kaj trian
spacon faru en ĝi. 17 Kaj jen Mi venigos akvan diluvon
sur la teron, por ekstermi ĉiun karnon, kiu havas en
si spiriton de vivo sub la ĉielo; ĉio, kio estas sur la
tero, pereos. 18 Kaj Mi starigos Mian interligon kun
vi; kaj vi eniros en la arkeon, vi kaj viaj filoj kaj via
edzino kaj la edzinoj de viaj filoj kune kun vi. 19 Kaj el
ĉiuj vivaĵoj, el ĉiu karno, enkonduku po unu paro el
ĉiuj en la arkeon, ke ili restu vivaj kun vi; virbesto kaj
virinbesto ili estu. 20 El la birdoj laŭ iliaj specoj, kaj el
la brutoj laŭ iliaj specoj, el ĉiuj rampaĵoj de la tero
laŭ iliaj specoj, po paro el ĉiuj eniru kun vi, por resti
vivaj. 21 Kaj vi prenu al vi el ĉiuj manĝaĵoj, kiuj estas
manĝataj, kaj kolektu al vi; kaj ĝi estu por vi kaj por
ili por manĝi. 22 Kaj Noa tion faris; ĉion, kiel Dio al li
ordonis, tiel li faris.

**7** Kaj la Eternulo diris al Noa: Eniru vi kaj via tuta
familio en la arkeon, ĉar vin Mi vidis, ke vi estas
virtulo antaŭ Mi en ĉi tiu generacio. 2 El ĉiuj brutoj
puraj prenu al vi po sep paroj, virbestojn kaj iliajn
inojn; kaj el la brutoj, kiuj ne estas puraj, po du,
virbeston kaj ĝian inon. 3 Ankaŭ el la birdoj de la ĉielo
po sep paroj, virbestojn kaj virinbestojn, por ke semo
restu sur la tuta tero. 4 Ĉar post sep tagoj Mi pluvigos
sur la teron dum kvardek tagoj kaj kvardek noktoj, kaj
Mi ekstermos de sur la tero ĉiujn ekzistaĵojn, kiujn
Mi kreis. 5 Kaj Noa faris ĉion, kion la Eternulo al li
ordonis. 6 Kaj Noa havis la aĝon de sescent jaroj, kiam
la akva diluvo venis sur la teron. 7 Kaj eniris Noa kaj
liaj filoj kaj lia edzino kaj la edzinoj de liaj filoj kune
kun li en la arkeon, pro la akvo de la diluvo. 8 El la
brutoj puraj, kaj el la brutoj, kiuj ne estas puraj, kaj el
la birdoj, kaj el ĉiuj rampaĵoj sur la tero, 9 po unu
paro venis al Noa en la arkeon, virbesto kaj ino, kiel
Dio ordonis al Noa. 10 Kaj kiam pasis la sep tagoj,
la diluva akvo venis sur la teron. 11 En la sescenta
jaro de la vivo de Noa, en la dua monato, en la dek-
sepa tago de la monato, en tiu tago disfendiĝis ĉiuj
fontoj de la granda abismo kaj la aperturoj de la ĉielo
malfermiĝis. 12 Kaj estis pluvo sur la tero dum kvardek
tagoj kaj kvardek noktoj. 13 Ĝuste en tiu tago eniris

en la arkeon Noa, kaj Ŝem kaj Ĥam kaj Jafet, la filoj de
Noa, kaj la edzino de Noa, kaj la tri edzinoj de liaj
filoj kune kun ili; 14 ili, kaj ĉiuj bestoj laŭ siaj specoj,
kaj ĉiuj brutoj laŭ siaj specoj, kaj ĉiuj rampaĵoj, kiuj
rampas sur la tero, laŭ siaj specoj, kaj ĉiuj flugaĵoj laŭ
siaj specoj, ĉiuj birdoj, ĉiuj flugilhavantoj. 15 Kaj eniris
al Noa en la arkeon po du el ĉiu karno, kiu havas en si
spiriton de vivo. 16 Kaj la venintoj, virbesto kaj ino el
ĉiu karno, eniris, kiel ordonis al ili Dio; kaj la Eternulo
fermis post ili. 17 Kaj estis diluvo dum kvardek tagoj
sur la tero; kaj multiĝis la akvo kaj levis la arkeon, kaj
ĝi estis alte super la tero. 18 Kaj la akvo fortiĝis sur la
tero, kaj la arkeo naĝis sur la supraĵo de la akvo. 19
Kaj la akvo treege fortiĝis kaj tre multiĝis sur la tero;
kaj kovriĝis ĉiuj altaj montoj, kiuj estas sub la ĉielo.
20 Dek kvin ulnojn pli alte leviĝis la akvo kaj kovris
la montojn. 21 Kaj pereis ĉiu karno, kiu moviĝas sur
la tero, la birdoj kaj la brutoj kaj la bestoj, kaj ĉiuj
rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero, kaj ĉiuj homoj. 22
Ĉio, kio havis en si spiriton de vivo, el ĉio, kio estis sur
la seka tero, mortis. 23 Kaj ekstermiĝis ĉiuj ekzistaĵoj,
kiuj estis sur la tero, de homo ĝis brutoj kaj rampaĵoj
kaj birdoj de la ĉielo; ili ekstermiĝis de sur la tero; kaj
restis nur Noa kaj kio estis kun li en la arkeo. 24 Kaj la
akvo okupis la teron dum cent kvindek tagoj.

**8** Kaj Dio rememoris Noan, kaj ĉiujn bestojn kaj
ĉiujn brutojn, kiuj estis kun li en la arkeo; kaj Dio
venigis venton sur la teron, kaj la akvo kvietiĝis. 2
Kaj fermiĝis la fontoj de la abismo kaj la aperturoj
de la ĉielo, kaj ĉesiĝis la pluvo el la ĉielo. 3 Kaj iom
post iom reforiĝis la akvo de sur la tero, kaj la akvo
komencis malmultiĝi post la paso de cent kvindek
tagoj. 4 Kaj la arkeo haltis en la sepa monato, en la
dek-sepa tago de la monato, sur la montoj Ararat. 5
Kaj la akvo konstante malpliiĝadis ĝis la deka monato;
en la unua tago de la deka monato montriĝis la suproj
de la montoj. 6 Kaj post kvardek tagoj Noa malfermis
la fenestron de la arkeo, kiun li faris. 7 Kaj li ellasis
korvon, kaj ĝi elflugis, forflugadis kaj revenadis, ĝis
forsekiĝis la akvo sur la tero. 8 Kaj li ellasis de si
kolombon, por vidi, ĉu jam malfortiĝis la akvo sur
la tero. 9 Sed la kolombo ne trovis ripozejon por
siaj piedoj, kaj ĝi revenis al li en la arkeon, ĉar akvo
estis sur la supraĵo de la tuta tero. Kaj li etendis sian
manon kaj prenis la kolombon kaj envenigis ĝin al
si en la arkeon. 10 Kaj li atendis ankoraŭ aliajn sep
tagojn, kaj li denove ellasis la kolombon el la arkeo. 11
Kaj revenis al li la kolombo en tempo vespera, kaj jen
ĝi havis en sia buŝo deŝiritan folion de olivarbo; kaj
Noa konvinkiĝis, ke la akvo malfortiĝis sur la tero. 12
Kaj li atendis ankoraŭ aliajn sep tagojn, kaj li ellasis
la kolombon, kaj ĉi tiu jam ne plu revenis al li. 13
Kaj en la sescent-unua jaro, en la unua tago de la
unua monato, forsekiĝis la akvo sur la tero; kaj Noa
malfermis la tegmenton de la arkeo, kaj li vidis, ke
sekiĝis la supraĵo de la tero. 14 Kaj en la dua monato,
en la dudek-sepa tago de la monato, la tero elsekiĝis.
15 Kaj Dio diris al Noa jene: 16 Eliru el la arkeo, vi kaj
via edzino kaj viaj filoj kaj la edzinoj de viaj filoj kune
kun vi; 17 ĉiujn bestojn, kiuj estas kun vi, el ĉiu karno,
el la birdoj kaj brutoj, kaj el ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas
sur la tero, elirigu kune kun vi; kaj ili moviĝu sur la
tero kaj fruktu kaj multiĝu sur la tero. 18 Kaj eliris
Noa kaj liaj filoj kaj lia edzino kaj la edzinoj de liaj
filoj kune kun li. 19 Ĉiuj bestoj, ĉiuj rampaĵoj, kaj ĉiuj
birdoj, ĉio, kio moviĝas sur la tero, laŭ siaj familioj,
eliris el la arkeo. 20 Kaj Noa konstruis altaron al la
Eternulo, kaj li prenis el ĉiuj puraj brutoj kaj el ĉiuj
puraj birdoj kaj oferis bruloferojn sur la altaro. 21 Kaj
la Eternulo flaris la agrablan odoron, kaj la Eternulo
diris en Sia koro: Mi ne plu malbenos la teron pro la
homo, ĉar la penso de la homa koro estas malbona
jam de lia juneco; kaj Mi ne batos plu ĉion vivantan,
kiel Mi faris. 22 De nun tiel longe, kiel la tero ekzistos,
semado kaj rikoltado, malvarmo kaj varmo, somero
kaj vintro, tago kaj nokto ne ĉesiĝos.

**9** Kaj Dio benis Noan kaj liajn filojn, kaj diris al ili:
Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la teron. 2 Kaj ili
timu vin kaj tremu antaŭ vi, ĉiuj bestoj de la tero kaj
ĉiuj birdoj de la ĉielo, ĉio, kio moviĝas sur la tero,
kaj ĉiuj fiŝoj de la maro; en viajn manojn ili estas
transdonitaj. 3 Ĉio, kio moviĝas kaj vivas, servu al vi
kiel manĝaĵo; kiel verdan herbon, Mi donis al vi ĉion.
4 Nur karnon kune kun ĝia animo, la sango, ne manĝu.
5 Ankaŭ vian sangon kaj animon Mi repostulos, el la
manoj de ĉiuj bestoj Mi ĝin repostulos, kaj el la manoj
de homo, el la manoj de ĉiu homo pro lia frato Mi
repostulos la animon de homo. 6 Se iu verŝos sangon
de homo, lia sango ankaŭ estos verŝita de homo; ĉar
laŭ la bildo de Dio estas farita la homo. 7 Kaj vi fruktu
kaj multiĝu, moviĝadu sur la tero kaj multiĝu sur ĝi. 8
Kaj Dio diris al Noa kaj al liaj filoj kune kun li jene: 9

Jen Mi starigas Mian interligon kun vi kaj kun via
idaro post vi; 10 kaj kun ĉiu viva ekzistaĵo, kiu estas
kun vi, el birdoj, el brutoj, kaj el ĉiuj bestoj de la tero
kun vi, el ĉiuj, kiuj eliris el la arkeo, kun ĉiuj bestoj
de la tero. 11 Kaj Mi starigas Mian interligon kun vi,
ke ne ekstermiĝos plu ĉiu karno per akvo de diluvo,
kaj ne estos plu diluvo, por pereigi la teron. 12 Kaj
Dio diris: Ĉi tio estas la signo de la interligo, kiun Mi
metas inter Mi kaj inter vi kaj inter ĉiu viva ekzistaĵo,
kiu estas kun vi, por eternaj generacioj: 13 Mian arkon
Mi metas en la nubon, kaj ĝi estu signo de la interligo
inter Mi kaj la tero. 14 Kaj kiam Mi venigos nubon
super la teron, montriĝos la arko en la nubo; 15 kaj Mi
rememoros Mian interligon, kiu ekzistas inter Mi kaj
vi kaj ĉiu viva ekzistaĵo el ĉiu karno, kaj la akvo ne
fariĝos plu diluvo, por pereigi ĉiun karnon. 16 Kaj la
arko estos en la nubo; kaj Mi ĝin vidos, por memori
pri la eterna interligo inter Dio kaj ĉiu viva ekzistaĵo
el ĉiu karno, kiu estas sur la tero. 17 Kaj Dio diris
al Noa: Ĉi tio estas la signo de la interligo, kiun Mi
starigis inter Mi kaj ĉiu karno, kiu estas sur la tero. 18
Kaj la filoj de Noa, kiuj eliris el la arkeo, estis: Ŝem,
Ĥam, kaj Jafet; kaj Ĥam estis la patro de Kanaan. 19
Tio estis la tri filoj de Noa; kaj de ili diskreskis la tuta
loĝantaro de la tero. 20 Kaj Noa komencis terkultivan
laboron kaj plantis vinberĝardenon. 21 Kaj li trinkis
el la vino kaj ebriiĝis, kaj nudiĝis en sia tendo. 22
Kaj Ĥam, la patro de Kanaan, vidis la nudecon de sia
patro, kaj li diris tion al siaj du fratoj ekstere. 23 Kaj
Ŝem kaj Jafet prenis la veston kaj metis ĝin sur siajn
ŝultrojn, kaj iris dorsdirekte kaj kovris la nudecon de
sia patro; kaj iliaj vizaĝoj estis turnitaj malantaŭen,
kaj la nudecon de sia patro ili ne vidis. 24 Kaj Noa
vekiĝis de sia ebrieco, kaj li sciiĝis, kiel agis kun li lia
pli juna filo. 25 Kaj li diris: Malbenita estu Kanaan;
Sklavo de sklavoj li estu ĉe siaj fratoj. 26 Glorata estu
la Eternulo, la Dio de Ŝem; Kaj Kanaan estu sklavo al
ili; 27 Dio disvastigu Jafeton, Kaj li loĝu en la tendoj
de Ŝem, Kaj Kanaan estu sklavo al ili. 28 Kaj Noa vivis
post la diluvo tricent kvindek jarojn. 29 Kaj la tuta
vivo de Noa estis naŭcent kvindek jaroj, kaj li mortis.

**10** Jen estas la generaciaro de la filoj de Noa: Ŝem,
Ĥam, kaj Jafet. Kaj naskiĝis al ili filoj post la
diluvo. 2 La filoj de Jafet: Gomer kaj Magog kaj Madaj
kaj Javan kaj Tubal kaj Meŝeĥ kaj Tiras. 3 Kaj la filoj
de Gomer: Aŝkenaz kaj Rifat kaj Togarma. 4 Kaj la filoj
de Javan: Eliŝa kaj Tarŝiŝ, Kitim kaj Dodanim. 5 De ĉi
tiuj dissemiĝis la insuloj da popoloj en siaj landoj, ĉiu
laŭ sia lingvo, laŭ siaj gentoj kaj nacioj. 6 Kaj la filoj
de Ĥam: Kuŝ kaj Micraim kaj Put kaj Kanaan. 7 Kaj la
filoj de Kuŝ: Seba kaj Ĥavila kaj Sabta kaj Raama kaj
Sabteĥa; kaj la filoj de Raama; Ŝeba kaj Dedan. 8 Kaj
Kuŝ naskigis Nimrodon, kiu komencis esti potenca sur
la tero. 9 Li estis potenca ĉasisto antaŭ la Eternulo;
tial oni diras: Kiel Nimrod, potenca ĉasisto antaŭ la
Eternulo. 10 Kaj la komenco de lia regno estis Babel kaj
Ereĥ kaj Akad kaj Kalne en la lando Ŝinar. 11 El ĉi tiu
lando li eliris en Asirion kaj konstruis la urbojn Nineve
kaj Reĥobot kaj Kalaĥ, 12 kaj Resen inter Nineve kaj
Kalaĥ (ĝi estis la granda urbo). 13 Kaj Micraim naskigis
la Ludidojn kaj la Anamidojn kaj la Lehabidojn kaj la
Naftuĥidojn 14 kaj la Patrusidojn kaj la Kasluĥidojn
(de kiuj devenis la Filiŝtoj) kaj la Kaftoridojn. 15 Kaj
de Kanaan naskiĝis Cidon, lia unuenaskito, kaj Ĥet,
16 kaj la Jebusidoj kaj la Amoridoj kaj la Girgaŝidoj
17 kaj la Ĥividoj kaj la Arkidoj kaj la Sinidoj 18 kaj
la Arvadidoj kaj la Cemaridoj kaj la Ĥamatidoj; kaj
poste la gentoj Kanaanaj disiĝis. 19 Kaj la limoj de
la Kanaanidoj estis de Cidon ĝis Gerar kaj Gaza, ĝis
Sodom kaj Gomora, Adma kaj Ceboim ĝis Laŝa. 20 Tio
estas la filoj de Ĥam laŭ siaj gentoj kaj lingvoj, en siaj
landoj kaj nacioj. 21 Naskiĝis infanoj ankaŭ al Ŝem,
la patro de ĉiuj Eberidoj, pli maljuna frato de Jafet.
22 La filoj de Ŝem: Elam kaj Aŝur kaj Arpaĥŝad kaj
Lud kaj Aram. 23 Kaj la filoj de Aram: Uc kaj Ĥul kaj
Geter kaj Maŝ. 24 Kaj al Arpaĥŝad naskiĝis Ŝelaĥ, kaj
al Ŝelaĥ naskiĝis Eber. 25 Kaj al Eber naskiĝis du filoj:
la nomo de unu estis Peleg, ĉar dum lia vivo dividiĝis
la tero; kaj la nomo de lia frato estis Joktan. 26 Kaj al
Joktan naskiĝis Almodad kaj Ŝelef kaj Ĥacarmavet kaj
Jeraĥ 27 kaj Hadoram kaj Uzal kaj Dikla 28 kaj Obal kaj
Abimael kaj Ŝeba 29 kaj Ofir kaj Ĥavila kaj Jobab. Ĉiuj
ĉi tiuj estis filoj de Joktan. 30 Kaj ilia loĝloko estis de
Meŝa ĝis Sefar, la orienta monto. 31 Tio estas la filoj
de Ŝem laŭ siaj gentoj kaj lingvoj, en siaj landoj, laŭ
siaj nacioj. 32 Tio estas la gentoj de la filoj de Noa,
laŭ siaj generacioj, en siaj nacioj; kaj de ili disiĝis la
popoloj sur la tero post la diluvo.

**11** Sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu
parolmaniero. 2 Kaj kiam ili ekiris de la oriento,
ili trovis valon en la lando Ŝinar kaj tie ekloĝis. 3
Kaj ili diris unu al alia: Venu, ni faru brikojn kaj ni

brulpretigu ilin per fajro. Kaj la brikoj fariĝis por ili
ŝtonoj, kaj la bitumo fariĝis por ili kalko. 4 Kaj ili
diris: Venu, ni konstruu al ni urbon, kaj turon, kies
supro atingos la ĉielon, kaj ni akiru al ni gloron, antaŭ
ol ni disiĝos sur la supraĵo de la tuta tero. 5 Kaj la
Eternulo malleviĝis, por vidi la urbon kaj la turon,
kiujn konstruis la homidoj. 6 Kaj la Eternulo diris: Jen
estas unu popolo, kaj unu lingvon ili ĉiuj havas; kaj
jen, kion ili komencis fari, kaj ili ne estos malhelpataj
en ĉio, kion ili decidis fari. 7 Ni malleviĝu do, kaj Ni
konfuzu tie ilian lingvon, por ke unu ne komprenu la
parolon de alia. 8 Kaj la Eternulo disigis ilin de tie sur
la supraĵon de la tuta tero, kaj ili ĉesis konstrui la
urbon. 9 Tial oni donis al ĝi la nomon Babel, ĉar tie la
Eternulo konfuzis la lingvon de la tuta tero kaj de
tie la Eternulo disigis ilin sur la supraĵon de la tuta
tero. 10 Jen estas la generaciaro de Ŝem: Ŝem havis
la aĝon de cent jaroj, kaj naskiĝis al li Arpaĥŝad, du
jarojn post la diluvo. 11 Kaj Ŝem vivis post la naskiĝo
de Arpaĥŝad kvincent jarojn, kaj naskiĝis al li filoj
kaj filinoj. 12 Kaj Arpaĥŝad vivis tridek kvin jarojn,
kaj naskiĝis al li Ŝelaĥ. 13 Kaj Arpaĥŝad vivis post la
naskiĝo de Ŝelaĥ kvarcent tri jarojn, kaj naskiĝis al li
filoj kaj filinoj. 14 Kaj Ŝelaĥ vivis tridek jarojn, kaj
naskiĝis al li Eber. 15 Kaj Ŝelaĥ vivis post la naskiĝo
de Eber kvarcent tri jarojn, kaj naskiĝis al li filoj kaj
filinoj. 16 Kaj Eber vivis tridek kvar jarojn, kaj naskiĝis
al li Peleg. 17 Kaj Eber vivis post la naskiĝo de Peleg
kvarcent tridek jarojn, kaj naskiĝis al li filoj kaj filinoj.
18 Kaj Peleg vivis tridek jarojn, kaj naskiĝis al li Reu.
19 Kaj Peleg vivis post la naskiĝo de Reu ducent naŭ
jarojn, kaj naskiĝis al li filoj kaj filinoj. 20 Kaj Reu vivis
tridek du jarojn, kaj naskiĝis al li Serug. 21 Kaj Reu
vivis post la naskiĝo de Serug ducent sep jarojn, kaj
naskiĝis al li filoj kaj filinoj. 22 Kaj Serug vivis tridek
jarojn, kaj naskiĝis al li Naĥor. 23 Kaj Serug vivis post
la naskiĝo de Naĥor ducent jarojn, kaj naskiĝis al li
filoj kaj filinoj. 24 Kaj Naĥor vivis dudek naŭ jarojn,
kaj naskiĝis al li Teraĥ. 25 Kaj Naĥor vivis post la
naskiĝo de Teraĥ cent dek naŭ jarojn, kaj naskiĝis al li
filoj kaj filinoj. 26 Kaj Teraĥ vivis sepdek jarojn, kaj
naskiĝis al li Abram, Naĥor, kaj Haran. 27 Kaj jen estas
la generaciaro de Teraĥ: al Teraĥ naskiĝis Abram,
Naĥor, kaj Haran; kaj al Haran naskiĝis Lot. 28 Kaj
Haran mortis antaŭ sia patro Teraĥ en sia lando de
naskiĝo, en Ur la Ĥaldea. 29 Kaj Abram kaj Naĥor
prenis al si edzinojn; la nomo de la edzino de Abram
estis Saraj, kaj la nomo de la edzino de Naĥor estis
Milka, filino de Haran, kiu estis la patro de Milka kaj
la patro de Jiska. 30 Kaj Saraj estis senfrukta kaj ne
havis infanon. 31 Kaj Teraĥ prenis sian filon Abram
kaj sian nepon Lot, filo de Haran, kaj sian bofilinon
Saraj, edzino de lia filo Abram; kaj ili eliris kune el Ur
la Ĥaldea, por iri en la landon Kanaanan; kaj ili venis
ĝis Ĥaran kaj enloĝiĝis tie. 32 Kaj Teraĥ atingis la
aĝon de ducent kvin jaroj, kaj Teraĥ mortis en Ĥaran.

**12** Kaj la Eternulo diris al Abram: Iru el via lando, el
inter via parencaro, kaj el la domo de via patro,
al la lando, kiun Mi montros al vi. 2 Kaj Mi faros
vin granda popolo, kaj Mi benos vin kaj grandigos
vian nomon, kaj vi estos beno. 3 Kaj Mi benos viajn
benantojn, kaj viajn malbenantojn Mi malbenos, kaj
beniĝos per vi ĉiuj gentoj de la tero. 4 Kaj Abram iris,
kiel la Eternulo diris al li, kaj kun li iris Lot. Kaj Abram
havis la aĝon de sepdek kvin jaroj, kiam li eliris el
Ĥaran. 5 Kaj Abram prenis sian edzinon Saraj kaj sian
nevon Lot, kaj ilian tutan havon, kiun ili akiris, kaj la
homojn, kiujn ili akiris en Ĥaran; kaj ili eliris, por iri al
la lando Kanaana; kaj ili venis en la landon Kanaanan.
6 Kaj Abram trapasis la landon ĝis la loko Ŝeĥem, ĝis
la kverko More; kaj la Kanaanidoj tiam loĝis en la
lando. 7 Kaj la Eternulo aperis al Abram, kaj diris: Al
via idaro Mi donos ĉi tiun teron. Kaj li konstruis tie
altaron al la Eternulo, kiu aperis al li. 8 Kaj de tie li
transloĝiĝis al la monto, kiu estas oriente de Bet-El,
kaj aranĝis sian tendon tiamaniere, ke Bet-El estis
okcidente kaj Aj oriente; kaj li konstruis tie altaron al
la Eternulo kaj preĝadis al la Eternulo. 9 Kaj Abram
iris pluen, ĉiam pluen al sudo. 10 Kaj estis malsato en
la lando. Kaj Abram malsupreniris Egiptujon, por tie
loĝi kelktempe, ĉar malfacila estis la malsato en la
lando. 11 Kaj kiam li estis jam proksime de Egiptujo, li
diris al sia edzino Saraj: Mi scias ja, ke vi estas virino
belaspekta; 12 kaj kiam la Egiptoj vin vidos, ili diros:
Tio estas lia edzino; kaj ili mortigos min, kaj vin ili
lasos viva. 13 Diru do, ke vi estas mia fratino, por ke al
mi estu bone pro vi kaj por ke mia animo restu viva
pro vi. 14 Kaj kiam Abram venis Egiptujon, la Egiptoj
vidis, ke la virino estas tre bela; 15 kaj vidis ŝin la
eminentuloj de Faraono, kaj ili laŭdis ŝin al Faraono;
kaj oni prenis la virinon en la domon de Faraono.
16 Kaj al Abram estis bone pro ŝi, kaj li havis ŝafojn
kaj bovojn kaj azenojn kaj sklavojn kaj sklavinojn kaj
azeninojn kaj kamelojn. 17 Kaj la Eternulo punis per

grandaj suferoj Faraonon kaj lian domon pro Saraj, la
edzino de Abram. 18 Kaj Faraono alvokis Abramon, kaj
diris: Kion vi faris al mi? kial vi ne diris al mi, ke ŝi
estas via edzino? 19 kial vi diris: Ŝi estas mia fratino?
Kaj mi prenis ŝin al mi kiel edzinon. Kaj nun jen estas
via edzino; prenu kaj foriru. 20 Kaj Faraono ordonis
pri li al homoj, kaj ili forkondukis lin kaj lian edzinon
kaj lian tutan havon.

13 Kaj Abram supreniris el Egiptujo, li kaj lia edzino,
kaj ĉio, kio estis kun li, kaj kun li ankaŭ Lot,
direktante sin al sudo. 2 Kaj Abram estis tre riĉa je
brutoj, arĝento, kaj oro. 3 Kaj li daŭrigis sian migradon
de sudo ĝis Bet-El, ĝis la loko, kie antaŭe estis lia
tendo inter Bet-El kaj Aj, 4 al la loko de la altaro, kiun
li tie faris antaŭe; kaj Abram tie preĝis al la Eternulo.
5 Kaj ankaŭ Lot, kiu iris kun Abram, havis ŝafojn kaj
bovojn kaj tendojn. 6 Kaj ne sufiĉis por ili la tero, ke
ili loĝu kune, ĉar ilia havo estis granda kaj ili ne povis
loĝi kune. 7 Kaj estis malpaco inter la paŝtistoj de la
brutaro de Abram kaj la paŝtistoj de la brutaro de Lot;
kaj la Kanaanidoj kaj Perizidoj tiam loĝis en la lando.
8 Kaj Abram diris al Lot: Ne estu malpaco inter mi
kaj vi kaj inter miaj paŝtistoj kaj viaj paŝtistoj, ĉar ni
estas fratoj. 9 La tuta tero estas ja antaŭ vi; apartiĝu
do de mi: se vi iros maldekstren, mi iros dekstren; se
vi iros dekstren, mi iros maldekstren. 10 Kaj Lot levis
siajn okulojn kaj vidis, ke la tuta ĉirkaŭaĵo de Jordan,
antaŭ ol la Eternulo pereigis Sodomon kaj Gomoran,
tuta estas akvumata kiel ĝardeno de la Eternulo, kiel
la lando Egipta, ĝis Coar. 11 Kaj Lot elektis al si la
tutan ĉirkaŭaĵon de Jordan; kaj Lot ekiris orienten;
kaj ili apartiĝis unu de la alia: 12 Abram enloĝiĝis en
la lando Kanaana, kaj Lot enloĝiĝis en la urboj de
la ĉirkaŭaĵo kaj starigis siajn tendojn ĝis Sodom. 13
Kaj la loĝantoj de Sodom estis malbonaj kaj tre pekaj
kontraŭ la Eternulo. 14 Kaj la Eternulo diris al Abram,
post kiam Lot apartiĝis de li: Levu viajn okulojn, kaj
rigardu de la loko, sur kiu vi nun estas, norden kaj
suden kaj orienten kaj okcidenten; 15 ĉar la tutan
teron, kiun vi vidas, Mi donos al vi kaj al via idaro
por eterne. 16 Kaj Mi faros vian idaron kiel polvo
de la tero; se iu povos kalkuli la polvon de la tero, li
kalkulos ankaŭ vian idaron. 17 Leviĝu, trairu la landon
laŭlonge kaj laŭlarĝe, ĉar al vi Mi ĝin donos. 18 Kaj
Abram forprenis sian tendon, kaj iris kaj ekloĝis en la
arbareto Mamre, kiu estas en Ĥebron; kaj li konstruis
tie altaron al la Eternulo.

14 Kaj estis en la tempo de Amrafel, reĝo de Ŝinar,
Arjoĥ, reĝo de Elasar, Kedorlaomer, reĝo de Elam,
kaj Tidal, reĝo de Gojim; 2 ili faris militon kontraŭ
Bera, reĝo de Sodom, kaj Birŝa, reĝo de Gomora, Ŝinab,
reĝo de Adma, kaj Ŝemeber, reĝo de Ceboim, kaj la
reĝo de Bela, kiu estas Coar. 3 Ĉiuj ĉi tiuj kunvenis en
la valo Sidim, kiu nun estas la Sala Maro. 4 Dek du
jarojn ili servis al Kedorlaomer, kaj en la dek-tria ili
ribeliĝis. 5 Kaj en la dek-kvara jaro venis Kedorlaomer,
kaj la reĝoj, kiuj estis kun li, kaj ili venkobatis la
Rafaidojn en Aŝterot-Karnaim, kaj la Zuzidojn en Ham,
kaj la Emidojn en Ŝave-Kirjataim, 6 kaj la Ĥoridojn sur
ilia monto Seir ĝis El-Paran, kiu estas ĉe la dezerto. 7
Kaj ili reiris kaj venis al En-Miŝpat, kiu estas Kadeŝ,
kaj venkobatis la tutan kampon de la Amalekidoj, kaj
ankaŭ la Amoridojn, kiuj loĝis en Ĥacacon-Tamar. 8
Kaj eliris la reĝo de Sodom kaj la reĝo de Gomora kaj
la reĝo de Adma kaj la reĝo de Ceboim, kaj la reĝo de
Bela, kiu estas Coar, kaj komencis batalon kontraŭ
ili en la valo Sidim, 9 kontraŭ Kedorlaomer, reĝo de
Elam, kaj Tidal, reĝo de Gojim, kaj Amrafel, reĝo de
Ŝinar, kaj Arjoĥ, reĝo de Elasar; kvar reĝoj kontraŭ
kvin. 10 Kaj en la valo Sidim estis multe da bitumaj
kavoj; kaj la reĝoj de Sodom kaj Gomora forkuris kaj
falis tien, kaj la restintoj kuris sur la monton. 11 Kaj ili
prenis la tutan havon de Sodom kaj Gomora kaj ilian
tutan manĝeblaĵon, kaj foriris. 12 Ili prenis Loton, la
nevon de Abram, kaj lian havon, ĉar li loĝis en Sodom,
kaj ili foriris. 13 Kaj venis forsaviĝinto kaj diris al
Abram la Hebreo, kiu loĝis en la arbareto de Mamre
la Amorido, frato de Eŝkol kaj frato de Aner, kiuj estis
en interligo kun Abram. 14 Kaj Abram aŭdis, ke lia
frato estas kaptita, kaj li elkondukis siajn ekzercitojn,
naskitajn en lia domo, tricent dek ok, kaj persekutis
ĝis Dan. 15 Kaj li dividis sin kontraŭ ili en la nokto, li
kaj liaj domanoj, kaj venkobatis ilin, kaj persekutis
ilin ĝis Ĥoba, kiu estas maldekstre de Damasko. 16
Kaj li revenigis la tutan havon, kaj ankaŭ sian fraton
Lot kaj lian havon li revenigis, kaj ankaŭ la virinojn
kaj la popolon. 17 Kaj la reĝo de Sodom eliris al li
renkonte, kiam li revenis, venkinte Kedorlaomeron
kaj la reĝojn, kiuj estis kun li, en la valon Ŝave, kiu
estas Valo de la Reĝo. 18 Kaj Melkicedek, reĝo de
Salem, elportis panon kaj vinon. Li estis pastro de

Dio Plejsupra. 19 Kaj li benis lin kaj diris: Benata estu
Abram de Dio Plejsupra, la Kreinto de la ĉielo kaj la
tero; 20 kaj benata estu Dio Plejsupra, kiu transdonis
viajn malamikojn en viajn manojn. Kaj Abram donis
al li dekonaĵon el ĉio. 21 Kaj la reĝo de Sodom diris al
Abram: Donu al mi la homojn, kaj la havon prenu al
vi. 22 Kaj Abram diris al la reĝo de Sodom: Mi levas
mian manon al la Eternulo, Dio Plejsupra, la Kreinto
de la ĉielo kaj la tero, 23 ke eĉ fadenon aŭ rimenon de
ŝuo mi ne prenos el ĉio, kio apartenas al vi, por ke
vi ne diru: Mi riĉigis Abramon; 24 escepto estos nur
tio, kion manĝis la junuloj, kaj la parto de la homoj,
kiuj iris kun mi: Aner, Eŝkol, kaj Mamre; ili prenu sian
parton.

15 Post tiuj fariĝoj la Eternulo diris al Abram en
vizio jene: Ne timu, Abram, Mi estas via ŝildo;
via rekompenco estas tre granda. 2 Kaj Abram diris:
Ho Eternulo, mia Sinjoro, kion Vi donos al mi? mi
vagas ja seninfane, kaj la administranto de mia domo
estas Eliezer el Damasko. 3 Kaj Abram diris: Al mi
Vi ne donis ja idaron, kaj jen mia domano estos mia
heredanto. 4 Kaj tiam la Eternulo diris al li jene: Ĉi
tiu ne estos via heredanto; nur tiu, kiu eliros el via
internaĵo, estos via heredanto. 5 Kaj Li elirigis lin
eksteren, kaj diris: Rigardu al la ĉielo kaj kalkulu la
stelojn, se vi povas ilin kalkuli. Kaj Li diris al li: Tiel
estos via idaro. 6 Kaj li kredis al la Eternulo; kaj tio
estis kalkulita al li kiel virto. 7 Kaj Li diris al li: Mi
estas la Eternulo, kiu elirigis vin el Ur la Ĥaldea, por
doni al vi ĉi tiun landon kiel posedaĵon. 8 Kaj li diris:
Ho Eternulo, mia Sinjoro, per kio mi povas scii, ke mi
ĝin posedos? 9 Kaj Li diris al li: Prenu por Mi bovinon
trijaran kaj kaprinon trijaran kaj ŝafon trijaran kaj
turton kaj junan kolombon. 10 Kaj li alportis al Li ĉion
ĉi tion, kaj Li distranĉis ilin laŭ la mezo kaj metis
ĉiujn partojn unu kontraŭ la alia, sed la birdojn Li
ne distranĉis. 11 Kaj la rabobirdoj malleviĝis sur la
kadavrojn, sed Abram ilin forpelis. 12 Ĉe la subiro de
la suno profunda dormo falis sur Abramon; kaj jen
timego pro la granda mallumo atakis lin. 13 Kaj Li diris
al Abram: Sciu, ke via idaro estos fremduloj en lando,
kiu ne apartenos al ili; kaj oni sklavigos kaj turmentos
ilin dum kvarcent jaroj. 14 Tamen la popolon, ĉe kiu ili
estos sklavoj, Mi juĝos; kaj poste ili eliros kun granda
havo. 15 Kaj vi foriros al viaj prapatroj en paco; vi
estos entombigita en bona maljuneco. 16 Kaj en la
kvara generacio ili revenos ĉi tien; ĉar la krimoj de la
Amoridoj ankoraŭ ne atingis plenecon. 17 Kiam la
suno subiris kaj fariĝis mallumo, subite forna fumo kaj
fajra flamo trakuris inter tiuj distranĉitaĵoj. 18 En tiu
tago la Eternulo faris interligon kun Abram, dirante:
Al via idaro Mi donos ĉi tiun landon, de la rivero de
Egiptujo ĝis la granda rivero, la rivero Eŭfrato: 19 la
Kenidojn kaj la Kenizidojn kaj la Kadmonidojn 20 kaj
la Ĥetidojn kaj la Perizidojn kaj la Rafaidojn 21 kaj la
Amoridojn kaj la Kanaanidojn kaj la Girgaŝidojn kaj la
Jebusidojn.

16 Kaj Saraj, la edzino de Abram, ne naskis al li; sed
ŝi havis sklavinon, Egiptinon, kies nomo estis
Hagar. 2 Kaj Saraj diris al Abram: Jen la Eternulo ŝlosis
min, ke mi ne nasku; eniru do al mia sklavino, eble mi
havos infanojn per ŝi. Kaj Abram obeis la voĉon de
Saraj. 3 Kaj Saraj, la edzino de Abram, prenis Hagaron
la Egiptinon, sian sklavinon, kiam pasis dek jaroj de la
tempo, kiam Abram ekloĝis en la lando Kanaana, kaj ŝi
donis ŝin al sia edzo Abram kiel edzinon. 4 Kaj li venis
al Hagar, kaj ŝi gravedâĝis. Kaj ŝi vidis, ke ŝi gravediĝis,
kaj tiam ŝia sinjorino senvaloriĝis en ŝiaj okuloj. 5 Kaj
Saraj diris al Abram: Vi estas maljusta kontraŭ mi; mi
donis mian sklavinon en viajn brakojn, sed kiam ŝi
vidis, ke ŝi gravediĝis, mi senvaloriĝis en ŝiaj okuloj;
la Eternulo juĝu inter mi kaj vi. 6 Kaj Abram diris al
Saraj: Jen via sklavino estas en viaj manoj, faru kun ŝi
ĉion, kio plaĉas al vi. Kaj Saraj komencis premi ŝin,
kaj ŝi forkuris. 7 Kaj trovis ŝin anĝelo de la Eternulo
ĉe akva fonto en la dezerto, ĉe la fonto sur la vojo
al Ŝur. 8 Kaj li diris: Hagar, sklavino de Saraj, de kie
vi venas kaj kien vi iras? Kaj ŝi diris: De Saraj, mia
sinjorino, mi forkuras. 9 Kaj la anĝelo de la Eternulo
diris al ŝi: Reiru al via sinjorino, kaj humiliĝu sub ŝiaj
manoj. 10 Kaj la anĝelo de la Eternulo diris al ŝi: Mi
multigos vian idaron tiel, ke pro multeco oni ne povos
ĝin kalkuli. 11 Kaj la anĝelo de la Eternulo diris al ŝi:
Jen vi estas graveda, kaj vi naskos filon; kaj vi donos al
li la nomon Iŝmael, ĉar la Eternulo aŭdis vian suferon.
12 Kaj li estos homo sovaĝa; lia mano estos kontraŭ
ĉiuj, kaj la manoj de ĉiuj kontraŭ li, kaj li loĝos antaŭ
ĉiuj siaj fratoj. 13 Kaj la Eternulon, kiu parolis al ŝi, ŝi
nomis: Dio-kiu-min-vidis; ĉar ŝi diris: Ĉi tie mi vidis
Tiun, kiu min vidas; kaj ĉu mi poste vivas? 14 Tial oni
nomis tiun puton puto de la Vivanto-Vidanto; ĝi estas
inter Kadeŝ kaj Bered. 15 Kaj Hagar naskis al Abram

filon; kaj Abram donis al sia filo, kiun naskis Hagar, la
nomon Iŝmael. 16 Kaj Abram havis la aĝon de okdek
ses jaroj, kiam Hagar naskis Iŝmaelon al Abram.

17 Kiam Abram havis la aĝon de naŭdek naŭ jaroj,
aperis la Eternulo al Abram, kaj diris al li: Mi
estas Dio la Plejpotenca; iradu antaŭ Mi kaj estu
senpeka. 2 Kaj Mi faros Mian interligon inter Mi kaj
vi, kaj Mi multigos vin tre forte. 3 Kaj Abram ĵetis
sin vizaĝaltere, kaj Dio parolis al li, dirante: 4 Jen
estas Mia interligo kun vi: vi estos patro de multe da
popoloj. 5 Kaj via nomo ne estos plu Abram, sed via
nomo estos Abraham, ĉar Mi faris vin patro de multe
da popoloj. 6 Kaj Mi fruktigos vin tre multe, kaj Mi
devenigos de vi popolojn, kaj reĝoj devenos de vi. 7
Kaj Mi starigos Mian interligon inter Mi kaj vi kaj via
idaro post vi en iliaj generacioj, eternan interligon, ke
Mi estos Dio por vi kaj por via idaro post vi. 8 Kaj Mi
donos al vi kaj al via idaro post vi la landon, en kiu vi
loĝas kiel fremdulo, la tutan landon Kanaanan, por
eterna posedaĵo, kaj Mi estos Dio por ili. 9 Kaj Dio
diris al Abraham: Kaj vi gardu Mian interligon, vi kaj
via idaro post vi en iliaj generacioj. 10 Jen estas Mia
interligo, kiun vi devas gardi inter Mi kaj vi kaj via
idaro post vi: ĉiu virseksulo ĉe vi estu cirkumcidata. 11
Kaj cirkumcidu la karnon de via prepucio, kaj tio estu
signo de interligo inter Mi kaj vi. 12 Kaj en la aĝo de
ok tagoj estu cirkumcidata ĉe vi en viaj generacioj ĉiu
virseksulo naskita en la domo aŭ aĉetita per mono ĉe
iu aligentulo, kiu ne estas el via idaro. 13 Cirkumcidata
estu ĉiu naskita en via domo aŭ aĉetita per via mono,
kaj Mia interligo estu sur via karno kiel interligo
eterna. 14 Kaj se estos prepucihava virseksulo, kiu
ne cirkumcidos la karnon de sia prepucio, tiu animo
ekstermiĝos el sia popolo: Mian interligon ĝi rompis.
15 Kaj Dio diris al Abraham: Vian edzinon Saraj ne
nomu Saraj, sed ŝia nomo estu Sara. 16 Kaj Mi benos
ŝin, kaj Mi donos de ŝi al vi filon; kaj Mi benos ŝin, kaj
de ŝi devenos popoloj, reĝoj de popoloj devenos de ŝi.
17 Kaj Abraham ĵetis sin vizaĝaltere, kaj ekridis, kaj
diris en sia koro: Ĉu de homo centjara fariĝos nasko,
kaj ĉu Sara la naŭdekjara naskos? 18 Kaj Abraham
diris al Dio: Ho, ke Iŝmael vivu antaŭ Vi! 19 Kaj Dio
diris: Efektive Sara, via edzino, naskos al vi filon, kaj
vi donos al li la nomon Isaak; kaj Mi starigos Mian
interligon kun li kiel interligon eternan por lia idaro
post li. 20 Ankaŭ pri Iŝmael Mi aŭdis vin: jen Mi benis
lin, kaj Mi fruktigos lin kaj Mi multigos lin tre forte;
dek du princoj naskiĝos de li, kaj Mi devenigos de li
grandan popolon. 21 Sed Mian interligon Mi starigos
kun Isaak, kiun naskos al vi Sara en ĉi tiu tempo en
la venonta jaro. 22 Kaj Li ĉesis paroli kun li, kaj Dio
leviĝis for de Abraham. 23 Kaj Abraham prenis sian
filon Iŝmael kaj ĉiujn naskitajn en lia domo kaj ĉiujn
aĉetitajn per lia mono, ĉiun virseksulon el la homoj
de la domo de Abraham, kaj li cirkumcidis la karnon
de ilia prepucio en tiu sama tago, kiel diris al li Dio. 24
Kaj Abraham havis la aĝon de naŭdek naŭ jaroj, kiam
li cirkumcidis la karnon de sia prepucio. 25 Kaj lia filo
Iŝmael havis la aĝon de dek tri jaroj, kiam la karno de
lia prepucio estis cirkumcidita. 26 En tiu sama tago
estis cirkumciditaj Abraham kaj lia filo Iŝmael; 27 kaj
ĉiuj liaj domanoj, kiuj naskiĝis en la domo aŭ estis
aĉetitaj per mono ĉe aligentulo, estis cirkumciditaj
kune kun li.

18 Kaj aperis al li la Eternulo en la arbareto Mamre,
kiam li sidis ĉe la pordo de la tendo dum la
varmego de la tago. 2 Kiam li levis siajn okulojn, li
vidis, ke jen tri viroj staras antaŭ li. Ekvidinte, li kuris
al ili renkonte de la pordo de la tendo kaj kliniĝis
antaŭ ili ĝis la tero. 3 Kaj li diris: Mia sinjoro! se
mi trovis placon en viaj okuloj, ne pasu preter vian
sklavon. 4 Oni alportos iom da akvo, kaj vi lavu viajn
piedojn kaj ripozu sub la arbo. 5 Kaj mi alportos
pecon da pano, por ke vi fortigu viajn korojn; poste vi
foriros; ĉar por tio vi pasis preter via sklavo. Kaj ili
diris: Faru tiel, kiel vi diris. 6 Kaj Abraham rapidis en
la tendon al Sara, kaj diris: Rapide prenu tri mezurojn
da plej bona faruno, knedu, kaj faru kukojn. 7 Kaj
ankaŭ al la bovoj Abraham kuris, kaj li prenis bovidon
delikatan kaj bonan kaj donis al la junulo, kaj tiu
rapide pretigis ĝin. 8 Kaj li prenis buteron kaj lakton
kaj la pretigitan bovidon kaj metis antaŭ ilin, kaj li
staris apud ili sub la arbo, kaj ili manĝis. 9 Kaj ili diris
al li: Kie estas Sara, via edzino? Kaj li respondis: Jen
ŝi estas en la tendo. 10 Kaj Li diris: Mi revenos al vi
en la sama jartempo, kaj tiam estos filo ĉe Sara, via
edzino. Kaj Sara aŭskultis ĉe la pordo de la tendo,
kiu estis malantaŭ Li. 11 Kaj Abraham kaj Sara estis
maljunuloj de profunda aĝo; ĉe Sara ĉesiĝis la virinaj
ordinaraĵoj. 12 Kaj Sara ekridis interne, dirante: Ĉu
kiam mi kadukiĝis, mi havus ankoraŭ volupton? kaj
mia sinjoro estas ja maljuna! 13 Kaj la Eternulo diris al

Abraham: Kial do Sara ridas, dirante: Ĉu efektive mi
naskos, kiam mi maljuniĝis? 14 Ĉu por la Eternulo
io estas malfacila? en la difinita tempo Mi revenos
al vi en la venonta jaro, kaj Sara havos filon. 15 Sed
Sara malkonfesis, dirante: Mi ne ridis; ĉar ŝi timis.
Sed Li diris: Ne, vi ridis. 16 Kaj leviĝis de tie la viroj
kaj direktiĝis al Sodom: kaj Abraham iris kun ili, por
akompani ilin. 17 Kaj la Eternulo diris: Ĉu mi kaŝos
antaŭ Abraham, kion Mi faras? 18 Abraham fariĝos
ja popolo granda kaj potenca, kaj per li beniĝos ĉiuj
popoloj de la tero. 19 Ĉar Mi lin elektis, por ke li
ordonu al siaj filoj kaj al sia domo post si, ke ili
observu la vojon de la Eternulo, agante virte kaj juste;
por ke la Eternulo plenumu pri Abraham, kion Li
diris pri li. 20 Kaj la Eternulo diris: Ĉar la kriado
de Sodom kaj Gomora estas granda kaj ilia pekado
estas tre peza, 21 tial Mi malsupreniros, kaj rigardos,
ĉu ili plene agas tiel, kiel estas la kriado, kiu venis
al Mi, aŭ ne; Mi sciiĝos. 22 Kaj la viroj turniĝis de
tie kaj iris al Sodom; kaj Abraham staris ankoraŭ
antaŭ la Eternulo. 23 Kaj Abraham alproksimiĝis,
kaj diris: Ĉu Vi ankaŭ pereigos virtulon kune kun
malvirtulo? 24 Eble ekzistas kvindek virtuloj en la
urbo: ĉu Vi tiam pereigos kaj ne indulgos la lokon pro
la kvindek virtuloj, kiuj estas en ĝi? 25 Ne decas por
Vi agi tiamaniere, ke Vi mortigu virtulon kune kun
malvirtulo, ke virtulo estu kiel malvirtulo; ne decas
por Vi, ke la Juĝanto de la tuta tero agu maljuste. 26
Kaj la Eternulo diris: Se Mi trovos en Sodom kvindek
virtulojn en la urbo, Mi indulgos la tutan lokon pro ili.
27 Kaj Abraham respondis, dirante: Jen mi ekkuraĝis
paroli al mia Sinjoro, kvankam mi estas polvo kaj
cindro; 28 eble al la kvindeko da virtuloj mankos kvin:
ĉu Vi pereigos pro la kvin la tutan urbon? Kaj Li diris:
Mi ne pereigos, se Mi trovos tie kvardek kvin. 29 Kaj li
plue parolis al Li kaj diris: Eble troviĝos tie kvardek?
Kaj Li diris: Mi ne faros tion pro la kvardek. 30 Kaj
li diris: Ne koleru, mia Sinjoro, ke mi parolos plue:
eble troviĝos tie tridek? Kaj Li diris: Mi ne faros, se
Mi trovos tie tridek. 31 Kaj li diris: Jen mi ekkuraĝis
paroli al mia Sinjoro: eble troviĝos dudek? Kaj Li diris:
Mi ne pereigos pro la dudek. 32 Kaj li diris: Ne koleru,
mia Sinjoro, ke mi parolos ankoraŭ nur unu fojon:
eble troviĝos tie dek? Kaj Li diris: Mi ne pereigos pro
la dek. 33 Kaj la Eternulo foriris, kiam Li ĉesis paroli
kun Abraham; kaj Abraham reiris al sia loko.

**19** Kaj la du anĝeloj venis Sodomon vespere, kaj
Lot tiam sidis ĉe la pordego de Sodom. Kiam
Lot ilin ekvidis, li leviĝis renkonte al ili kaj kliniĝis
vizaĝaltere. 2 Kaj li diris: Mi petas vin, sinjoroj, envenu
en la domon de via sklavo kaj pasigu la nokton kaj
lavu viajn piedojn, kaj vi leviĝos matene kaj iros vian
vojon. Kaj ili diris: Ne, ni pasigos la nokton sur la
strato. 3 Kaj li tre petegis ilin, kaj ili direktis sin al li
kaj envenis en lian domon; kaj li faris al ili festenon,
kaj li bakis macojn, kaj ili manĝis. 4 Antaŭ ol ili kuŝiĝis,
la homoj de la urbo, la homoj de Sodom, ĉirkaŭis la
domon, de la junuloj ĝis la maljunuloj, la tuta popolo,
de ĉiuj finoj. 5 Kaj ili vokis Loton, kaj diris al li: Kie
estas la viroj, kiuj venis al vi dum la nokto? elirigu ilin
al ni, por ke ni ilin ekkonu. 6 Kaj Lot eliris al ili antaŭ
la sojlon, kaj la pordon li ŝlosis post si. 7 Kaj li diris:
Ho, miaj fratoj, ne agu malbone! 8 Jen mi havas du
filinojn, kiuj ankoraŭ ne ekkonis viron; mi elirigos ilin
al vi, kaj faru kun ili, kion vi deziras; nur al tiuj viroj
nenion faru, ĉar por tio ili venis sub la ombron de
mia tegmento. 9 Sed ili diris: Iru for! Kaj ili diris plue:
Vi venis ĉi tien kiel fremdulo, kaj vi volas juĝi! nun ni
pli malbone agos kun vi, ol kun ili. Kaj ili tre insiste
postulis de la viro, de Lot, kaj ili aliris, por elrompi la
pordon. 10 Tiam tiuj viroj etendis siajn manojn kaj
envenigis Loton al si en la domon, kaj la pordon ili
ŝlosis; 11 kaj la homojn, kiuj estis antaŭ la sojlo de la
domo, ili frapis per blindeco, de la malgrandaj ĝis
la grandaj, tiel ke tiuj laciĝis, serĉante la pordon. 12
Kaj la viroj diris al Lot: Kiun vi havas ĉi tie? bofilon,
aŭ viajn filojn aŭ viajn filinojn, aŭ ĉiun ajn, kiun vi
havas en la urbo, elirigu ilin el ĉi tiu loko; 13 ĉar ni
ekstermos ĉi tiun lokon, ĉar granda fariĝis ilia kriado
antaŭ la Eternulo, kaj la Eternulo sendis nin, por ĝin
pereigi. 14 Kaj Lot eliris, kaj parolis kun siaj bofiloj,
prenontaj liajn filinojn, kaj diris: Leviĝu, eliru el ĉi
tiu loko, ĉar la Eternulo pereigos la urbon. Sed liaj
bofiloj rigardis lin kiel ŝercanton. 15 Kiam leviĝis la
matenruĝo, la anĝeloj rapidigis Loton, dirante: Leviĝu,
prenu vian edzinon kaj ambaŭ viajn filinojn, kiuj ĉi
tie troviĝas, por ke vi ne pereu pro la krimeco de
la urbo. 16 Sed ĉar li malrapidis, tial la viroj kaptis
lian manon kaj la manon de lia edzino kaj la manojn
de liaj du filinoj, pro kompato de la Eternulo al li,
kaj ili elirigis lin kaj metis lin ekster la urbon. 17 Kaj
kiam ili elkondukis lin eksteren, ili diris al li: Savu
vin pro via animo; ne rigardu malantaŭen kaj haltu

nenie en la tuta ĉirkaŭaĵo; sur la monton savu vin,
por ke vi ne pereu. 18 Kaj Lot diris al ili: Ho, ne, mia
Sinjoro! 19 Jen Via sklavo plaĉis al Vi, kaj granda estas
la favorkoreco, kiun Vi montris al mi, konservante la
vivon al mia animo; sed mi ne povas savi min sur la
monton, ĉar povus trafi min malfeliĉo kaj mi mortus.
20 Jen ĉi tiu urbo estas sufiĉe proksima, por kuri tien,
kaj ĝi estas malgranda; mi savos min tien; ĝi estas ja
malgranda; kaj mia animo restos viva. 21 Kaj Li diris
al li: Jen Mi komplezos al vi ankaŭ en ĉi tiu afero,
kaj Mi ne renversos la urbon, pri kiu vi parolis. 22
Rapide savu vin tien, ĉar Mi nenion povas fari, ĝis vi
venos tien. Tial tiu urbo ricevis la nomon Coar. 23 La
suno leviĝis super la teron, kiam Lot venis Coaron. 24
Kaj la Eternulo pluvigis sur Sodomon kaj Gomoran
sulfuron kaj fajron de la Eternulo el la ĉielo. 25 Kaj Li
ruinigis tiujn urbojn kaj la tutan ĉirkaŭaĵon kaj ĉiujn
loĝantojn de la urboj kaj la kreskaĵojn de la tero. 26
Kaj lia edzino ekrigardis malantaŭen, kaj ŝi fariĝis
kolono el salo. 27 Kaj matene Abraham leviĝis kaj iris
al la loko, kie li estis starinta antaŭ la Eternulo; 28
kaj li ekrigardis en la direkto al Sodom kaj Gomora
kaj al la tuta lando de la ĉirkaŭaĵo, kaj li vidis, ke jen
fumo leviĝas de la tero kiel fumo el forno. 29 Kaj
kiam Dio estis pereiganta la urbojn de la ĉirkaŭaĵo,
Li rememoris pri Abraham, kaj Li elirigis Loton el
la mezo de la ruinigado, kiam Li estis ruiniganta la
urbojn, en kiuj loĝis Lot. 30 Kaj Lot eliris el Coar kaj
ekloĝis sur la monto, kaj liaj du filinoj kun li; ĉar li
timis loĝi en Coar. Kaj li loĝis en kaverno, li kaj liaj du
filinoj. 31 Kaj la pli maljuna diris al la pli juna: Nia
patro estas maljuna, kaj en la lando ne ekzistas viro,
kiu envenus al ni laŭ la moro de la tuta tero; 32 tial ni
ebriigu nian patron per vino, kaj ni kuŝu kun li, por
ke ni aperigu de nia patro idaron. 33 Kaj ili ebriigis
sian patron per vino en tiu nokto; kaj venis la pli
maljuna kaj kuŝis kun sia patro; kaj li ne sciis, kiam ŝi
kuŝiĝis kaj kiam ŝi leviĝis. 34 La morgaŭan tagon la
pli maljuna diris al la pli juna: Jen mi kuŝis hieraŭ
kun mia patro; ni ebriigu lin per vino ankaŭ en ĉi
tiu nokto, kaj vi venu, kuŝu kun li, por ke ni aperigu
de nia patro idaron. 35 Kaj ili ankaŭ en ĉi tiu nokto
ebriigis sian patron per vino; kaj la pli juna iris kaj
kuŝis kun li; kaj li ne sciis, kiam ŝi kuŝiĝis kaj kiam ŝi
leviĝis. 36 Kaj ambaŭ filinoj de Lot graveddiĝis de sia
patro. 37 Kaj la pli maljuna naskis filon, kaj ŝi donis al
li la nomon Moab; li estas la prapatro de la Moabidoj
ĝis nun. 38 Kaj la pli juna ankaŭ naskis filon, kaj ŝi
donis al li la nomon Ben-Ami; li estas la prapatro de
la Amonidoj ĝis nun.

**20** Kaj Abraham ekmigris de tie al la lando suda,
kaj li ekloĝis inter Kadeŝ kaj Ŝur; kaj li loĝis kiel
fremdulo en Gerar. 2 Kaj Abraham diris pri sia edzino
Sara: Ŝi estas mia fratino. Kaj Abimeleĥ, reĝo de Gerar,
sendis kaj prenis Saran. 3 Kaj Dio venis al Abimeleĥ
nokte en la sonĝo, kaj diris al li: Vi mortos pro la
virino, kiun vi prenis, ĉar ŝi estas edzino de edzo. 4
Sed Abimeleĥ ne alproksimiĝis al ŝi, kaj li diris: Mia
Sinjoro! ĉu vi mortigos ankaŭ senkulpan popolon?
5 Li diris ja al mi: Ŝi estas mia fratino; kaj ŝi ankaŭ
diris al mi: Li estas mia frato. En senkulpeco de mia
koro kaj en pureco de miaj manoj mi faris tion. 6
Kaj Dio diris al li en la sonĝo: Mi ankaŭ scias, ke en
senkulpeco de via koro vi tion faris, kaj tial Mi detenis
vin, ke vi ne peku kontraŭ Mi, tial Mi ne lasis, ke
vi kuntuŝiĝu kun ŝi. 7 Kaj nun redonu la edzinon al
la edzo, ĉar li estas profeto, kaj li preĝos pri vi, kaj
vi restos viva; sed se vi ne redonos, tiam sciu, ke vi
mortos, vi kaj ĉiuj viaj. 8 Kaj Abimeleĥ leviĝis frue
matene, kaj li vokis ĉiujn siajn sklavojn kaj rakontis
ĉion ĉi tion al iliaj oreloj; kaj la homoj tre ektimis. 9
Kaj Abimeleĥ vokis Abrahamon, kaj diris al li: Kion
vi faris al ni? kaj per kio mi pekis antaŭ vi, ke vi
venigis sur min kaj sur mian regnon grandan pekon?
aferojn, kiuj ne estas farataj, vi faris kontraŭ mi. 10
Kaj Abimeleĥ diris al Abraham: Kion vi vidis, kiam vi
faris tiun aferon? 11 Kaj Abraham diris: Mi pensis,
ke ne ekzistas timo antaŭ Dio en ĉi tiu loko, kaj ke
oni mortigos min pro mia edzino. 12 Kaj efektive ŝi
estas mia fratino, filino de mia patro, nur ne filino de
mia patrino; kaj ŝi fariĝis mia edzino. 13 Kaj kiam Dio
elmigrigis min el la domo de mia patro, mi diris al ŝi:
Faru al mi ĉi tiun komplezon, en kian ajn lokon ni
venos, diru pri mi: Li estas mia frato. 14 Kaj Abimeleĥ
prenis ŝafojn kaj bovojn kaj sklavojn kaj sklavinojn
kaj donis al Abraham, kaj li redonis al li lian edzinon
Sara. 15 Kaj Abimeleĥ diris: Jen mia lando estas antaŭ
vi; kie plaĉas al vi, tie loĝiĝu. 16 Kaj al Sara li diris:
Jen mi donis mil arĝentajn monerojn al via frato; tio
estu al vi kovro por la okuloj antaŭ ĉiuj, kiuj estas kun
vi, kaj antaŭ ĉiuj vi estas pravigita. 17 Kaj Abraham
ekpreĝis al Dio; kaj Dio sanigis Abimeleĥon kaj lian
edzinon kaj liajn sklavinojn, kaj ili komencis naski. 18

Ĉar la Eternulo estis ŝlosinta ĉiujn uterojn en la domo
de Abimeleĥ pro Sara, la edzino de Abraham.

**21** Kaj la Eternulo rememoris Saran, kiel Li diris,
kaj la Eternulo faris al Sara, kiel Li parolis. 2
Kaj Sara gravediĝis kaj naskis al Abraham filon en
lia maljuneco, en la difinita tempo, pri kiu Dio al li
diris. 3 Kaj Abraham donis al sia filo, kiu naskiĝis al li,
kiun naskis al li Sara, la nomon Isaak. 4 Kaj Abraham
cirkumcidis sian filon Isaak, kiam tiu havis la aĝon
de ok tagoj, kiel ordonis al li Dio. 5 Kaj Abraham
havis la aĝon de cent jaroj, kiam naskiĝis al li lia filo
Isaak. 6 Kaj Sara diris: Ridindaĵon faris al mi Dio; ĉiu,
kiu aŭdos, ridos pri mi. 7 Kaj ŝi diris: Kiu dirus al
Abraham, ke Sara mamnutros infanojn? ĉar mi naskis
filon en lia maljuneco. 8 Kaj la infano kreskis, kaj ĝi
estis demamigita, kaj Abraham faris grandan festenon
en la tago, en kiu Isaak estis demamigita. 9 Kaj Sara
vidis, ke la filo de Hagar la Egiptino, kiun ĉi tiu naskis
al Abraham, mokas. 10 Kaj ŝi diris al Abraham: Forpelu
ĉi tiun sklavinon kaj ŝian filon; ĉar la filo de ĉi tiu
sklavino ne heredos kun mia filo, kun Isaak. 11 Kaj
la afero forte malplaĉis al Abraham pro lia filo. 12
Kaj Dio diris al Abraham: Ĝi ne malplaĉu al vi pro
la knabo kaj pro via sklavino; pri ĉio, kion diros al
vi Sara, obeu ŝian voĉon; ĉar per Isaak oni nomos
vian idaron. 13 Sed ankaŭ el la filo de la sklavino
Mi kreskigos popolon, ĉar li estas via semo. 14 Kaj
Abraham leviĝis frue matene, kaj prenis panon kaj
felsakon kun akvo kaj donis al Hagar, metante ĝin
sur ŝian ŝultron, ankaŭ la infanon, kaj foririgis ŝin;
kaj ŝi iris, kaj ŝi erarvagis en la dezerto Beer-Ŝeba.
15 Kaj konsumiĝis la akvo de la felsako, kaj ŝi ĵetis la
infanon sub unu el la arbetaĵoj. 16 Kaj ŝi iris kaj sidiĝis
kontraŭe, en la malproksimeco de pafo el pafarko; ĉar
ŝi diris: Mi ne povas rigardi la morton de la infano.
Kaj ŝi sidiĝis kontraŭe, kaj ŝi komencis laŭte plori. 17
Kaj Dio aŭdis la voĉon de la knabo; kaj anĝelo de Dio
vokis Hagaron el la ĉielo, kaj diris al ŝi: Kio estas al vi,
Hagar? ne timu, ĉar Dio aŭdis la voĉon de la knabo el
la loko, kie li estas. 18 Leviĝu, prenu la knabon kaj
tenu lin per via mano, ĉar grandan popolon Mi faros
el li. 19 Kaj Dio malfermis ŝiajn okulojn, kaj ŝi ekvidis
puton kun akvo, kaj ŝi iris kaj plenigis la felsakon
per akvo kaj trinkigis la knabon. 20 Kaj Dio estis kun
la knabo, kaj li grandiĝis kaj loĝis en la dezerto kaj
fariĝis arkpafisto. 21 Kaj li loĝis en la dezerto Paran;
kaj lia patrino prenis al li edzinon el la lando Egipta.
22 Kaj en tiu tempo Abimeleĥ kaj lia militestro Piĥol
diris al Abraham jene: Dio estas kun vi en ĉio, kion
vi faras; 23 nun ĵuru do al mi per Dio, ke vi ne agos
malfidele kun mi, nek kun mia filo, nek kun mia nepo;
ke tiel same favorkore, kiel mi agis kun vi, vi agos kun
mi, kaj kun la lando, en kiu vi loĝas kiel fremdulo. 24
Kaj Abraham diris: Mi ĵuras. 25 Kaj Abraham riproĉis
Abimeleĥon pro la akva puto, kiun perforte forprenis
la sklavoj de Abimeleĥ. 26 Kaj Abimeleĥ diris: Mi ne
scias, kiu faris tion, kaj ankaŭ vi ne diris al mi; mi eĉ
ne aŭdis pri tio ĝis hodiaŭ. 27 Kaj Abraham prenis
ŝafojn kaj bovojn kaj donis al Abimeleĥ, kaj ili ambaŭ
starigis inter si interligon. 28 Kaj Abraham starigis
sep ŝafidojn aparte. 29 Kaj Abimeleĥ diris al Abraham:
Por kio estas tiuj sep ŝafidoj, kiujn vi starigis aparte?
30 Kaj tiu diris: Sep ŝafidojn prenu el mia mano, por
ke ili estu por mi atesto, ke mi elfosis tiun puton. 31
Tial tiu loko havas la nomon Beer-Ŝeba, ĉar tie ili
ambaŭ ĵuris. 32 Kaj ili starigis interligon en Beer-Ŝeba.
Kaj Abimeleĥ kaj lia militestro Piĥol leviĝis kaj reiris
en la landon de la Filiŝtoj. 33 Kaj Abraham plantis
tamariskon en Beer-Ŝeba, kaj preĝis tie al la Eternulo,
la Dio eterna. 34 Kaj Abraham loĝis en la lando de la
Filiŝtoj longan tempon.

**22** Post tiuj okazintaĵoj Dio provis Abrahamon, kaj
diris al li: Abraham! Kaj tiu respondis: Jen mi
estas. 2 Kaj Li diris: Prenu vian filon, vian solan, kiun
vi amas, Isaakon, kaj iru en la landon Morija, kaj oferu
lin tie kiel bruloferon sur unu el la montoj, kiun Mi
montros al vi. 3 Kaj Abraham leviĝis frue matene kaj
selis sian azenon kaj prenis siajn du junulojn kun si
kaj sian filon Isaak; kaj li fendis lignon por brulofero,
kaj leviĝis kaj iris al tiu loko, pri kiu diris al li Dio. 4
En la tria tago Abraham levis siajn okulojn kaj ekvidis
la lokon de malproksime. 5 Kaj Abraham diris al siaj
junuloj: Restu ĉi tie kun la azeno, kaj mi kun la knabo
iros tien, kaj ni adorkliniĝos kaj revenos al vi. 6 Kaj
Abraham prenis la lignon por la brulofero kaj metis
ĝin sur sian filon Isaak, kaj li prenis en sian manon
la fajron kaj la tranĉilon; kaj ili iris ambaŭ kune. 7
Kaj Isaak diris al sia patro Abraham: Mia patro! Kaj
tiu respondis: Jen mi estas, mia filo. Kaj li diris: Jen
estas la fajro kaj la ligno, sed kie estas la ŝafo por la
brulofero? 8 Kaj Abraham diris: Dio antaŭvidos al Si
la ŝafon por la brulofero, mia filo. Kaj ili iris ambaŭ

kune. 9 Kaj ili venis al la loko, pri kiu diris al li Dio;
kaj Abraham konstruis tie la altaron kaj surmetis la
lignon, kaj ligis sian filon Isaak kaj metis lin sur la
altaron super la ligno. 10 Kaj Abraham etendis sian
manon kaj prenis la tranĉilon, por buĉi sian filon.
11 Kaj ekvokis al li anĝelo de la Eternulo el la ĉielo,
kaj diris: Abraham, Abraham! Kaj li respondis: Jen
mi estas. 12 Kaj Tiu diris: Ne etendu vian manon sur
la knabon, kaj faru al li nenion; ĉar nun Mi scias, ke
vi timas Dion kaj vi ne indulgis pro Mi vian filon, la
solan. 13 Kaj Abraham levis siajn okulojn, kaj vidis,
ke jen virŝafo malantaŭe implikiĝis per la kornoj en
la arbetaĵoj. Kaj Abraham iris kaj prenis la virŝafon,
kaj oferis ĝin kiel bruloferon anstataŭ sia filo. 14 Kaj
Abraham donis al tiu loko la nomon: La Eternulo
Vidas; tial oni ankoraŭ nun diras: Sur la monto, kie la
Eternulo aperas. 15 Kaj denove anĝelo de la Eternulo
vokis al Abraham el la ĉielo, 16 kaj diris: Mi ĵuras per
Mi, diras la Eternulo, ke ĉar vi faris tiun aferon kaj
ne indulgis vian filon, la solan; 17 tial Mi benos vin
kaj Mi multigos vian idaron simile al la steloj de la
ĉielo kaj al la sablo sur la bordo de la maro; kaj via
idaro posedos la pordegojn de siaj malamikoj. 18 Kaj
beniĝos per via idaro ĉiuj popoloj de la tero, pro tio,
ke vi obeis Mian voĉon. 19 Kaj Abraham revenis al siaj
junuloj, kaj ili leviĝis kaj iris kune al Beer-Ŝeba; kaj
Abraham loĝis en Beer-Ŝeba. 20 Post tiuj okazintaĵoj
oni sciigis al Abraham, dirante: Jen ankaŭ Milka naskis
infanojn al via frato NaĤor: 21 la unuenaskiton Uc, kaj
lian fraton Buz, kaj Kemuelon, la patron de Aram; 22
kaj Kesedon kaj Ĥazon kaj Pildaŝon kaj Jidlafon kaj
Betuelon. 23 Kaj de Betuel naskiĝis Rebeka. Ĉi tiujn ok
naskis Milka al NaĤor, la frato de Abraham. 24 Kaj lia
kromvirino, nome Reuma, ankaŭ naskis: TebaĤon kaj
GaĤamon kaj TaĤaŝon kaj MaaĤan.

**23** Kaj la vivo de Sara estis cent dudek sep jaroj;
tiom estis la jaroj de la vivo de Sara. 2 Kaj Sara
mortis en Kirjat-Arba, kiu estas Ĥebron, en la lando
Kanaana. Kaj Abraham venis, por funebri pri Sara
kaj plori pri ŝi. 3 Kaj Abraham leviĝis for de sia
mortintino, kaj diris al la filoj de Ĥet jene: 4 Fremdulo
kaj pasloĝanto mi estas ĉe vi; donu al mi posedotan
lokon por tombo inter vi, por ke mi enterigu mian
mortintinon, kiu estas antaŭ mi. 5 Kaj la filoj de Ĥet
respondis al Abraham, dirante al li: 6 Aŭskultu nin,
nia sinjoro! vi estas princo de Dio inter ni; en la plej
elektitaj niaj tomboj enterigu vian mortintinon; neniu
el ni rifuzos al vi sian tomblokon, por enterigi vian
mortintinon. 7 Kaj Abraham leviĝis, kaj profunde
kliniĝis antaŭ la popolo de la lando, antaŭ la filoj de
Ĥet. 8 Kaj li diris al ili jene: Se plaĉas al vi, ke mi
enterigu mian mortintinon, kiu estas antaŭ mi, tiam
aŭskultu min kaj petu por mi Efronon, la filon de
CoĤar, 9 ke li donu al mi la duoblan kavernon, kiun
li havas en la fino de sia kampo; por plena sumo da
mono li donu ĝin al mi inter vi por tomba posedaĵo.
10 Kaj Efron sidis inter la filoj de Ĥet, kaj respondis
Efron la Ĥetido al Abraham aŭdeble por la filoj de
Ĥet, antaŭ ĉiuj, kiuj venis en la pordegon de lia urbo,
dirante: 11 Ne, mia sinjoro, aŭskultu min! la kampon
mi donas al vi, kaj la kavernon, kiu estas sur ĝi, al vi
mi donas, antaŭ la okuloj de la filoj de mia popolo
mi donas ĝin al vi; enterigu vian mortintinon. 12
Kaj Abraham profunde kliniĝis antaŭ la popolo de la
lando. 13 Kaj li diris al Efron aŭdeble por la popolo
de la lando jene: Mi petas, aŭskultu min: mi donas
monon por la kampo; prenu de mi, kaj mi enterigos tie
mian mortintinon. 14 Kaj Efron respondis al Abraham,
dirante al li: 15 Mia sinjoro, aŭskultu min: la tero
valoras kvarcent siklojn; sed kio ĝi estas inter mi
kaj vi? enterigu vian mortintinon. 16 Kaj Abraham
aŭskultis Efronon, kaj Abraham pesis al Efron la
monon, pri kiu li parolis aŭdeble por la filoj de Ĥet,
kvarcent siklojn da arĝento, uzata en la komerco. 17
Kaj la kampo de Efron kun la duobla kaverno, kiu estis
antaŭ Mamre, la kampo kaj la kaverno sur ĝi kaj ĉiuj
arboj sur la kampo, inter ĉiuj ĝiaj limoj ĉirkaŭe, fariĝis
18 posedaĵo de Abraham antaŭ la okuloj de la filoj de
Ĥet, de ĉiuj, kiuj venis en la pordegon de lia urbo. 19
Kaj post tio Abraham enterigis sian edzinon Sara en la
duobla kaverno de la kampo, antaŭ Mamre, kiu estas
Ĥebron, en la lando Kanaana. 20 Kaj la kampo kaj la
kaverno sur ĝi fariĝis tomba posedaĵo de Abraham,
kiun li akiris de la filoj de Ĥet.

**24** Kaj Abraham estis maljuna kaj en profunda aĝo.
Kaj la Eternulo benis Abrahamon en ĉio. 2 Kaj
Abraham diris al sia sklavo, la administranto de lia
domo, kiu regis ĉion, kio apartenis al li: Metu vian
manon sub mian femuron; 3 kaj mi ĵurigas vin per la
Eternulo, la Dio de la ĉielo kaj la Dio de la tero, ke
vi ne prenos edzinon por mia filo el la filinoj de la
Kanaanidoj, inter kiuj mi loĝas; 4 sed en mian landon

kaj en mian patrujon vi iros kaj vi prenos edzinon
por mia filo Isaak. 5 Kaj la sklavo diris al li: Eble la
virino ne volos iri kun mi en ĉi tiun landon; ĉu mi
tiam devas revenigi vian filon en la landon, el kiu
vi eliris? 6 Kaj Abraham diris al li: Gardu vin, ne
revenigu mian filon tien. 7 La Eternulo, la Dio de la
ĉielo, kiu prenis min el la domo de mia patro kaj el
mia patrujo, kaj diris al mi kaj ĵuris al mi, dirante: Al
via idaro Mi donos ĉi tiun landon — Li sendos Sian
anĝelon antaŭ vi, kaj vi prenos edzinon por mia filo
el tie. 8 Kaj se la virino ne volos iri kun vi, tiam vi
fariĝos libera de ĉi tiu mia ĵuro; nur mian filon ne
revenigu tien. 9 Kaj la sklavo metis sian manon sub
la femuron de sia sinjoro Abraham kaj ĵuris al li pri
tiu afero. 10 Kaj la sklavo prenis dek kamelojn el la
kameloj de sia sinjoro, kaj li iris; kaj ĉiaj bonaĵoj de
lia sinjoro estis en liaj manoj. Kaj li leviĝis kaj iris
Mezopotamion, al la urbo Naĥor. 11 Kaj li genuigis la
kamelojn ekstere de la urbo, ĉe puto kun akvo, en
vespera tempo, en la tempo, kiam eliras la virinoj,
por ĉerpi akvon. 12 Kaj li diris: Ho Eternulo, Dio de
mia sinjoro Abraham, sukcesigu min hodiaŭ kaj faru
favorkoraĵon al mia sinjoro Abraham. 13 Jen mi staras
apud la fonto da akvo, kaj la filinoj de la urbanoj
eliras, por ĉerpi akvon; 14 kaj la junulinon, al kiu
mi diros: Volu klini vian kruĉon, ke mi trinku, kaj ŝi
diros: Trinku, kaj mi trinkigos ankaŭ viajn kamelojn
— ŝin Vi destinis por Via sklavo Isaak; kaj per tio mi
sciiĝos, ke Vi faris favorkoraĵon al mia sinjoro. 15 Kaj
antaŭ ol li finis paroli, jen eliras Rebeka, kiu estis
naskita al Betuel, la filo de Milka, edzino de Naĥor,
frato de Abraham; kaj ŝia kruĉo estis sur ŝia ŝultro. 16
Kaj la junulino estis tre belaspekta, virgulino, kiun
ankoraŭ ne ekkonis viro. Kaj ŝi malsupreniris al la
fonto kaj plenigis sian kruĉon kaj iris supren. 17 Kaj la
sklavo kuris al ŝi renkonte, kaj diris: Volu lasi min
trinki iom da akvo el via kruĉo. 18 Kaj ŝi diris: Trinku,
mia sinjoro; kaj ŝi rapide mallevis la kruĉon sur sian
manon, kaj ŝi donis al li trinki. 19 Kaj kiam ŝi sufiĉe lin
trinkigis, ŝi diris: Ankaŭ por viaj kameloj mi ĉerpos,
ĝis ili finos trinki. 20 Kaj rapide ŝi elverŝis el sia kruĉo
en la trinkujon, kaj kuris denove al la puto, por ĉerpi
por ĉiuj liaj kameloj. 21 Kaj la viro admiris ŝin silente,
por konvinkiĝi, ĉu la Eternulo prosperigis lian vojon
aŭ ne. 22 Kaj kiam la kameloj ĉesis trinki, tiam la viro
prenis oran ringon, havantan la pezon de duono de
siklo, kaj du braceletojn por ŝiaj manoj, havantajn la
pezon de dek sikloj da oro. 23 Kaj li diris: Kies filino vi
estas? volu diri al mi; ĉu en la domo de via patro estas
loko por ni, por tradormi la nokton? 24 Kaj ŝi diris
al li: Mi estas filino de Betuel, filo de Milka, kiun ŝi
naskis al Naĥor. 25 Kaj ŝi diris al li: Ankaŭ da pajlo kaj
da furaĝo ni havas multe, kaj ankaŭ lokon, por ke vi
tradormu la nokton. 26 Kaj la viro kliniĝis kaj faris
adoron al la Eternulo. 27 Kaj li diris: Glorata estu la
Eternulo, la Dio de mia sinjoro Abraham, kiu ne lasis
sen Sia favorkoreco kaj vereco mian sinjoron. Per la
vojo, kiun mi iris, la Eternulo alkondukis min al la
domo de la frato de mia sinjoro. 28 Kaj la junulino
kuris, kaj rakontis tiujn aferojn en la domo de sia
patrino. 29 Kaj Rebeka havis fraton, kiu estis nomata
Laban. Kaj Laban kuris al la viro eksteren, al la fonto.
30 Kaj kiam li vidis la ringon kaj la braceletojn sur la
manoj de sia fratino, kaj kiam li aŭdis la vortojn de
sia fratino Rebeka, kiu diris: Tiel parolis kun mi tiu
viro — tiam li iris al la viro, kaj jen tiu staras ĉe la
kameloj apud la fonto. 31 Kaj li diris: Venu, benita
de la Eternulo; kial vi staras ekstere? mi pretigis
la domon kaj ankaŭ lokon por la kameloj. 32 Kaj li
venigis la viron en la domon, kaj malligis la kamelojn,
kaj donis pajlon kaj furaĝon al la kameloj, kaj akvon
por lavi liajn piedojn, kaj la piedojn de la homoj, kiuj
estis kun li. 33 Kaj estis metita antaŭ li manĝo; sed li
diris: Mi ne manĝos, antaŭ ol mi diros mian aferon.
Kaj tiu diris: Parolu. 34 Kaj li diris: Sklavo de Abraham
mi estas. 35 Kaj la Eternulo forte benis mian sinjoron,
kaj li fariĝis granda; kaj Li donis al li ŝafojn kaj bovojn
kaj arĝenton kaj oron kaj sklavojn kaj sklavinojn kaj
kamelojn kaj azenojn. 36 Kaj Sara, la edzino de mia
sinjoro, naskis filon al mia sinjoro, kiam ŝi maljuniĝis;
kaj li donis al li ĉion, kion li havis. 37 Kaj mia sinjoro
ĵurigis min, dirante: Ne prenu edzinon por mia filo el
la filinoj de la Kanaanidoj, en kies lando mi loĝas. 38
Nur al la domo de mia patro iru kaj al mia familio,
kaj prenu edzinon por mia filo. 39 Kaj mi diris al mia
sinjoro: Eble la virino ne volos iri kun mi? 40 Kaj li
diris al mi: La Eternulo, antaŭ kiu mi iradis, sendos
Sian anĝelon kun vi kaj sukcesigos vian vojon; kaj vi
prenos edzinon por mia filo el mia familio kaj el la
domo de mia patro. 41 Tiam vi estos libera de mia
ĵuro, kiam vi venos al mia familio; kaj se ili ne donos al
vi, vi estos libera de mia ĵuro. 42 Kaj mi venis hodiaŭ
al la fonto, kaj mi diris: Eternulo, Dio de mia sinjoro
Abraham! ho, se Vi volus sukcesigi mian vojon, kiun

mi nun iras! 43 Jen mi staras apud la fonto da akvo; la
virgulino, kiu eliros, por ĉerpi, kaj al kiu mi diros:
Lasu min trinki iom da akvo el via kruĉo, 44 kaj kiu
diros al mi: Trinku vi, kaj ankaŭ por viaj kameloj mi
ĉerpos — tio estas la virino, kiun la Eternulo destinis
por la filo de mia sinjoro. 45 Antaŭ ol mi finis paroli
en mia koro, jen Rebeka eliras, kaj ŝia kruĉo estas sur
ŝia ŝultro; kaj ŝi malsupreniris al la fonto kaj ĉerpis.
Kaj mi diris al ŝi: Volu trinkigi min. 46 Kaj rapide ŝi
deprenis sian kruĉon de la ŝultro, kaj diris: Trinku, kaj
ankaŭ viajn kamelojn mi trinkigos. Kaj mi trinkis, kaj
ankaŭ la kamelojn ŝi trinkigis. 47 Kaj mi demandis ŝin,
kaj mi diris: Kies filino vi estas? Kaj ŝi diris: Filino de
Betuel, filo de Naĥor, kiun naskis al li Milka. Kaj mi
metis la ringon sur ŝian nazon kaj la braceletojn sur
ŝiajn manojn. 48 Kaj mi kliniĝis kaj faris adoron al la
Eternulo, kaj mi gloris la Eternulon, la Dion de mia
sinjoro Abraham, kiu kondukis min per ĝusta vojo,
por ke mi prenu la filinon de la frato de mia sinjoro
por lia filo. 49 Kaj nun se vi volas fari favorkoraĵon
kaj ĝustaĵon al mia sinjoro, diru al mi; kaj se ne,
vi ankaŭ diru al mi, kaj mi turnos min dekstren aŭ
maldekstren. 50 Tiam respondis Laban kaj Betuel, kaj
diris: De la Eternulo venis ĉi tiu afero; ni ne povas
diri al vi ion malbonan aŭ bonan. 51 Jen Rebeka estas
antaŭ vi; prenu ŝin kaj iru, kaj ŝi estu edzino al la
filo de via sinjoro, kiel diris la Eternulo. 52 Kaj kiam
la sklavo de Abraham aŭdis iliajn vortojn, li kliniĝis
ĝis la tero al la Eternulo. 53 Kaj la sklavo elprenis
arĝentaĵojn kaj oraĵojn kaj vestojn kaj donis al Rebeka;
kaj donacojn li donis al ŝia frato kaj al ŝia patrino. 54
Kaj manĝis kaj trinkis li kaj la homoj, kiuj estis kun
li, kaj ili tradormis tie la nokton. Kaj kiam ili leviĝis
matene, li diris: Lasu min for al mia sinjoro. 55 Tiam
ŝia frato kaj ŝia patrino diris: La junulino restu kun ni
almenaŭ dek tagojn, poste vi iros. 56 Kaj li diris al ili:
Ne retenu min, ĉar la Eternulo sukcesigis mian vojon.
Lasu min for, kaj mi iros al mia sinjoro. 57 Kaj ili diris:
Ni vokos la junulinon, kaj ni demandos, kion ŝi diros.
58 Kaj ili alvokis Rebekan, kaj diris al ŝi: Ĉu vi iros kun
ĉi tiu viro? Kaj ŝi diris: Mi iros. 59 Kaj ili forsendis sian
fratinon Rebeka kaj ŝian nutrintinon kaj la sklavon de
Abraham kaj liajn homojn. 60 Kaj ili benis Rebekan,
kaj diris al ŝi: Nia fratino! miloj da miloj elkresku el vi,
kaj via idaro posedu la pordegojn de siaj malamikoj.
61 Kaj leviĝis Rebeka kaj ŝiaj servistinoj kaj sidiĝis sur
la kameloj, kaj ili iris post tiu viro; kaj la sklavo prenis
Rebekan kaj foriris. 62 Kaj Isaak venis de la vojo, kiu
kondukas al la puto de la Vivanto-Vidanto; li loĝis en
la suda lando. 63 Kaj Isaak eliris, por mediti sur la
kampo, kiam komenciĝis vespero; kaj li levis siajn
okulojn kaj vidis, ke jen venas kameloj. 64 Kaj Rebeka
levis siajn okulojn, kaj ŝi ekvidis Isaakon kaj desaltis
de la kamelo. 65 Kaj ŝi diris al la sklavo: Kiu estas
tiu viro, kiu iras sur la kampo renkonte al ni? Kaj la
sklavo diris: Tio estas mia sinjoro. Kaj ŝi prenis la
kovrotukon kaj kovris sin. 66 Kaj la sklavo rakontis al
Isaak ĉion, kion li faris. 67 Kaj Isaak enkondukis ŝin en
la tendon de sia patrino Sara; kaj li prenis Rebekan,
kaj ŝi fariĝis lia edzino, kaj li ekamis ŝin. Kaj Isaak
konsoliĝis pri sia patrino.

25 Kaj Abraham prenis alian edzinon, kiu estis
nomata Ketura. 2 Kaj ŝi naskis al li Zimranon
kaj Jokŝanon kaj Medanon kaj Midjanon kaj Jiŝbakon
kaj Ŝuaĥon. 3 Kaj de Jokŝan naskiĝis Ŝeba kaj Dedan.
Kaj la filoj de Dedan estis la Aŝuridoj, Letuŝidoj, kaj
Leumidoj. 4 Kaj la filoj de Midjan estis Efa kaj Efer kaj
Ĥanoĥ kaj Abida kaj Eldaa. Ĉiuj ĉi tiuj estis la filoj de
Ketura. 5 Kaj Abraham fordonis ĉion, kion li havis, al
Isaak. 6 Kaj al la filoj de siaj kromvirinoj Abraham
donis donacojn, kaj foririgis ilin de sia filo Isaak,
ankoraŭ dum sia vivo, orienten, en landon orientan. 7
Kaj la nombro de la jaroj de vivo de Abraham, kiujn li
travivis, estis cent sepdek kvin jaroj. 8 Kaj Abraham
konsumiĝis kaj mortis en bona maljuneco, profundaĝa
kaj sata de vivo, kaj li alkolektiĝis al sia popolo. 9 Kaj
enterigis lin liaj filoj Isaak kaj Iŝmael en la duobla
kaverno, kiu troviĝas antaŭ Mamre, sur la kampo de
Efron, filo de Coĥar, la Ĥetido. 10 Sur la kampo, kiun
aĉetis Abraham de la filoj de Ĥet, tie estas enterigitaj
Abraham kaj lia edzino Sara. 11 Kaj post la morto de
Abraham Dio benis lian filon Isaak. Kaj Isaak loĝis
ĉe la puto de la Vivanto-Vidanto. 12 Kaj jen estas la
generaciaro de Iŝmael, filo de Abraham, kiun Hagar,
la Egiptino, sklavino de Sara, naskis al Abraham;
13 kaj jen estas la nomoj de la filoj de Iŝmael, laŭ
iliaj nomoj kaj generacioj: Nebajot, la unuenaskita
de Iŝmael, kaj Kedar kaj Adbeel kaj Mibsam 14 kaj
Miŝma kaj Duma kaj Masa, 15 Ĥadad kaj Tema, Jetur,
Nafiŝ, kaj Kedma. 16 Tio estas la filoj de Iŝmael, kaj tio
estas iliaj nomoj en iliaj vilaĝoj kaj tendaroj, dek du
princoj super siaj gentoj. 17 Kaj la daŭro de la vivo de
Iŝmael estis cent tridek sep jaroj; kaj li konsumiĝis kaj

mortis kaj alkolektiĝis al sia popolo. 18 Kaj ili loĝis de
Ĥavila ĝis Ŝur, kiu estas antaŭ Egiptujo, sur la vojo al
Asirio. Antaŭ ĉiuj siaj fratoj li loĝis. 19 Kaj jen estas la
generaciaro de Isaak, filo de Abraham: de Abraham
naskiĝis Isaak. 20 Kaj Isaak havis la aĝon de kvardek
jaroj, kiam li prenis kiel edzinon Rebekan, filinon de
Betuel la Siriano, el Mezopotamio, fratinon de Laban
la Siriano. 21 Kaj Isaak preĝis al la Eternulo pri sia
edzino, ĉar ŝi estis senfrukta; kaj la Eternulo cedis
al lia preĝo, kaj lia edzino Rebeka gravediĝis. 22 Kaj
la infanoj interpuŝiĝis en ŝia interno, kaj ŝi diris: Se
estas tiel, por kio do mi gravediĝis? Kaj ŝi iris, por
demandi la Eternulon. 23 Kaj la Eternulo diris al ŝi: Du
popoloj estas en via ventro, Kaj du gentoj disapartiĝos
el via interno; Kaj unu popolo estos pli forta ol la
dua, Kaj la pli granda servos la malpli grandan. 24
Kaj kiam venis la tempo, ke ŝi nasku, tiam montriĝis,
ke ĝemeloj estas en ŝia ventro. 25 Kaj la unua eliris
ruĝa, li estis tuta kiel harkovrita felo; kaj oni donis al
li la nomon Esav. 26 Kaj poste eliris lia frato, tenante
per la mano la kalkanon de Esav; kaj oni donis al li
la nomon Jakob. Kaj Isaak havis la aĝon de sesdek
jaroj, kiam ili naskiĝis. 27 Kaj la knaboj grandiĝis; kaj
Esav fariĝis lerta ĉasisto, kampisto, kaj Jakob fariĝis
homo kvieta, sidanta en la tendo. 28 Kaj Isaak amis
Esavon, ĉar li manĝadis lian ĉasaĵon; sed Rebeka amis
Jakobon. 29 Kaj Jakob kuiris kuiraĵon; kaj Esav venis
de la kampo kaj estis laca. 30 Kaj Esav diris al Jakob:
Donu al mi manĝi de ĉi tiu ruĝa kuiraĵo, ĉar mi estas
laca. Tial oni donis al li la nomon Edom. 31 Kaj Jakob
diris: Vendu al mi hodiaŭ vian unuenaskitecon. 32 Kaj
Esav diris: Jen mi tuj mortos; por kio do mi bezonas la
unuenaskitecon? 33 Kaj Jakob diris: Ĵuru al mi hodiaŭ;
kaj tiu ĵuris al li kaj vendis sian unuenaskitecon al
Jakob. 34 Kaj Jakob donis al Esav panon kaj kuiraĵon el
lentoj, kaj li manĝis kaj trinkis, kaj leviĝis kaj foriris.
Kaj Esav malŝatis la unuenaskitecon.

**26** Estis malsato en la lando, krom la antaŭa malsato,
kiu estis en la tempo de Abraham. Kaj Isaak iris
al Abimeleĥ, la reĝo de la Filiŝtoj, en Gerar. 2 Kaj
la Eternulo aperis al li, kaj diris: Ne iru Egiptujon,
loĝu en la lando, pri kiu Mi diros al vi. 3 Vivu kiel
fremdulo en ĉi tiu lando, kaj Mi estos kun vi, kaj Mi
benos vin; ĉar al vi kaj al via idaro Mi donos ĉiujn
ĉi tiujn landojn, kaj Mi plenumos la ĵuron, kiun Mi
ĵuris al via patro Abraham. 4 Kaj Mi multigos vian
idaron simile al la steloj de la ĉielo, kaj Mi donos al
via idaro ĉiujn ĉi tiujn landojn, kaj beniĝos per via
idaro ĉiuj popoloj de la tero; 5 pro tio, ke Abraham
obeis Mian voĉon, kaj plenumadis Miajn aranĝojn,
Miajn leĝojn, kaj Miajn instruojn. 6 Kaj Isaak ekloĝis
en Gerar. 7 Kaj kiam la homoj de tiu loko demandis pri
lia edzino, li diris: Ŝi estas mia fratino; ĉar li timis diri:
Mia edzino; por ke la homoj de la loko ne mortigu lin
pro Rebeka, ĉar ŝi estis belaspekta. 8 Unu fojon, kiam
li estis tie jam de longa tempo, Abimeleĥ, la reĝo de
la Filiŝtoj, rigardis tra la fenestro, kaj vidis, ke Isaak
amuziĝas kun sia edzino Rebeka. 9 Tiam Abimeleĥ
vokis Isaakon, kaj diris: Jen, ŝi estas ja via edzino;
kial do vi diris: Ŝi estas mia fratino? Kaj Isaak diris
al li: Ĉar mi pensis, ke eble mi mortos pro ŝi. 10 Kaj
Abimeleĥ diris: Kion do vi faris al ni! preskaŭ jam
kuŝiĝis unu el la popolo kun via edzino, kaj vi venigus
sur nin krimon. 11 Kaj Abimeleĥ faris ordonon al
la tuta popolo jene: Kiu tuŝos ĉi tiun viron aŭ lian
edzinon, tiu mortos. 12 Kaj Isaak semis en tiu lando,
kaj havis en tiu jaro centoble-mezuran rikolton; kaj la
Eternulo lin benis. 13 Kaj tiu homo grandiĝis kaj ĉiam
pli kaj pli grandiĝadis, ĝis li fariĝis tre granda. 14 Kaj
li havis tre multe da brutoj malgrandaj kaj brutoj
grandaj kaj grandan servistaron; kaj la Filiŝtoj enviis
lin. 15 Kaj ĉiujn putojn, kiujn elfosis la sklavoj de lia
patro en la tempo de lia patro Abraham, la Filiŝtoj
ŝtopis kaj plenigis ilin per tero. 16 Tiam Abimeleĥ
diris al Isaak: Foriru de ni, ĉar vi fariĝis multe pli
forta ol ni. 17 Kaj Isaak foriris de tie kaj aranĝis siajn
tendojn en la valo de Gerar, kaj tie li ekloĝis. 18 Kaj
Isaak denove elfosis la akvoputojn, kiujn oni elfosis
en la tempo de lia patro Abraham kaj la Filiŝtoj ŝtopis
post la morto de Abraham; kaj li donis al ili tiujn
samajn nomojn, kiujn donis al ili lia patro. 19 Kaj la
sklavoj de Isaak fosis en la valo kaj trovis tie puton
kun freŝa akvo. 20 Kaj disputis la paŝtistoj de Gerar
kun la paŝtistoj de Isaak, dirante: Al ni apartenas la
akvo. Kaj oni donis al la puto la nomon Esek, ĉar oni
disputis pri ĝi. 21 Kaj ili elfosis alian puton, kaj ankaŭ
pri ĝi ili disputis; kaj oni donis al ĝi la nomon Sitna.
22 Kaj ili foriĝis de tie kaj elfosis alian puton, kaj pri ĝi
oni ne disputis. Kaj li donis al ĝi la nomon Reĥobot,
dirante: Nun la Eternulo donis al ni vastan lokon, kaj
ni multiĝos sur la tero. 23 Kaj de tie li formigris al
Beer-Ŝeba. 24 Kaj aperis al li la Eternulo en tiu nokto,
kaj diris: Mi estas la Dio de via patro Abraham; ne

timu, ĉar Mi estas kun vi, kaj Mi benos vin kaj Mi
multigos vian idaron pro Abraham, Mia servanto. 25
Kaj li konstruis tie altaron kaj preĝis al la Eternulo.
Kaj li aranĝis tie sian tendon, kaj la sklavoj de Isaak
elfosis tie puton. 26 Kaj Abimeleĥ iris al li el Gerar, kaj
ankaŭ lia amiko Aĥuzat kaj lia militestro Piĥol. 27
Kaj Isaak diris al ili: Por kio vi venis al mi? vi min
ja malamas kaj forpelis min de vi. 28 Kaj ili diris: Ni
vidis, ke la Eternulo estas kun vi; tial ni diris: Estu
ĵuro inter ni, inter ni kaj vi, kaj ni faru interligon kun
vi, 29 ke vi ne faru al ni malbonon, kiel ni vin ne tuŝis
kaj kiel ni faris al vi nur bonon kaj lasis vin foriri en
paco; vi estas nun benito de la Eternulo. 30 Kaj li faris
por ili festenon, kaj ili manĝis kaj trinkis. 31 Kaj ili
leviĝis frue matene kaj ĵuris al si reciproke. Kaj Isaak
lasis ilin foriri, kaj ili foriris de li en paco. 32 Kaj en
tiu tago venis la sklavoj de Isaak, kaj raportis al li pri
la puto, kiun ili elfosis, kaj diris al li: Ni trovis akvon.
33 Kaj li donis al ĝi la nomon Ŝiba; pro tio la nomo
de la urbo estas Beer-Ŝeba ĝis hodiaŭ. 34 Kiam Esav
havis la aĝon de kvardek jaroj, li prenis kiel edzinojn
Jehuditon, filinon de Beeri la Ĥetido, kaj Basmaton,
filinon de Elon la Ĥetido. 35 Kaj ili multe ĉagrenis
Isaakon kaj Rebekan.

27 Kiam Isaak maljuniĝis kaj la vidado de liaj okuloj
malakriĝis, li vokis Esavon, sian pli maljunan
filon, kaj diris al li: Mia filo! Kaj tiu diris al li: Jen mi
estas. 2 Kaj li diris: Jen mi maljuniĝis; mi ne scias,
kiam mi mortos; 3 prenu do nun viajn armilojn, vian
sagujon kaj vian pafarkon, kaj iru sur la kampon kaj
ĉasu por mi ĉasaĵon; 4 kaj faru por mi bongustan
manĝaĵon, kian mi amas, kaj alportu al mi, kaj mi
ĝin manĝos, por ke mia animo vin benu, antaŭ ol
mi mortos. 5 Sed Rebeka aŭdis, kiam Isaak parolis
al sia filo Esav. Kaj Esav iris sur la kampon, por ĉasi
ĉasaĵon kaj alporti. 6 Kaj Rebeka diris al sia filo Jakob
jene: Mi aŭdis, ke via patro diris al via frato Esav jene:
7 Alportu al mi ĉasaĵon kaj faru por mi bongustan
manĝaĵon, kaj mi manĝos, kaj mi benos vin antaŭ
la Eternulo antaŭ mia morto. 8 Kaj nun, mia filo,
aŭskultu mian voĉon, kion mi ordonas al vi: 9 iru al la
brutaro kaj alportu al mi de tie du bonajn kapridojn,
kaj mi faros el ili bongustan manĝaĵon por via patro,
kian li amas; 10 kaj vi alportos al via patro, kaj li
manĝos, por ke li benu vin antaŭ sia morto. 11 Kaj
Jakob diris al sia patrino Rebeka: Mia frato Esav estas
ja homo harkovrita, kaj mi estas homo glata; 12 eble
mia patro min palpos, tiam mi estos en liaj okuloj kiel
trompanto, kaj mi venigos sur min malbenon, sed ne
benon. 13 Kaj lia patrino diris al li: Sur mi estu tiu
malbeno, mia filo; nur aŭskultu mian voĉon kaj iru,
alportu al mi. 14 Kaj li iris kaj prenis kaj alportis al sia
patrino, kaj lia patrino faris bongustan manĝaĵon,
kian amis lia patro. 15 Kaj Rebeka prenis la luksajn
vestojn de sia pli maljuna filo Esav, kiujn ŝi havis ĉe si
en la domo, kaj ŝi vestis sian pli junan filon Jakob; 16
kaj per la feloj de la kapridoj ŝi vestis liajn manojn kaj
la glataĵon de lia kolo. 17 Kaj ŝi donis la bongustan
manĝaĵon kaj la panon, kiujn ŝi pretigis, en la manon
de sia filo Jakob. 18 Kaj li venis al sia patro, kaj diris:
Mia patro! Kaj tiu diris: Jen mi estas; kiu vi estas, mia
filo? 19 Kaj Jakob diris al sia patro: Mi estas Esav, via
unuenaskito; mi faris, kiel vi diris al mi; volu leviĝi,
sidiĝu, kaj manĝu mian ĉasaĵon, por ke via animo
min benu. 20 Kaj Isaak diris al sia filo: Kiamaniere
vi tiel rapide trovis, mia filo? Kaj tiu diris: Ĉar la
Eternulo, via Dio, sendis al mi renkonte. 21 Kaj Isaak
diris al Jakob: Alproksimiĝu, kaj mi vin palpos, mia
filo, ĉu tio estas vi, mia filo Esav, aŭ ne. 22 Kaj Jakob
alproksimiĝis al sia patro Isaak, kaj tiu lin palpis, kaj
diris: La voĉo estas voĉo de Jakob, sed la manoj estas
manoj de Esav. 23 Kaj li ne rekonis lin, ĉar liaj manoj
estis kiel la manoj de lia frato Esav, harkovritaj; kaj li
benis lin. 24 Kaj li diris: Ĉu tio estas vi, mia filo Esav?
Kaj tiu diris: Mi. 25 Kaj li diris: Alŝovu al mi, kaj mi
manĝos la ĉasaĵon de mia filo, por ke mia animo vin
benu. Kaj li alŝovis al li, kaj tiu manĝis; kaj li alportis
al li vinon, kaj tiu trinkis. 26 Kaj lia patro Isaak diris
al li: Alproksimiĝu kaj kisu min, mia filo. 27 Kaj li
alproksimiĝis kaj kisis lin, kaj tiu flaris la odoron de
liaj vestoj, kaj li benis lin, kaj diris: Vidu, la odoro de
mia filo Estas kiel la odoro de kampo, kiun la Eternulo
benis; 28 Dio donu al vi roson ĉielan Kaj grason de
la tero Kaj multe da greno kaj mosto. 29 Popoloj vin
servu, Kaj gentoj kliniĝu antaŭ vi; Estu sinjoro super
viaj fratoj, Kaj kliniĝu antaŭ vi la filoj de via patrino;
Viaj malbenantoj estu malbenataj, Kaj viaj benantoj
estu benataj. 30 Kaj kiam Isaak finis beni Jakobon
kaj apenaŭ Jakob eliris de antaŭ sia patro Isaak, lia
frato Esav venis de sia ĉasado. 31 Kaj ankaŭ li faris
bongustan manĝaĵon kaj alportis al sia patro, kaj diris
al sia patro: Leviĝu, mia patro, kaj manĝu la ĉasaĵon
de via filo, por ke via animo min benu. 32 Kaj lia patro

Isaak diris al li: Kiu vi estas? Kaj li diris: Mi estas via
unuenaskita filo Esav. 33 Tiam Isaak ektremis per tre
granda tremo, kaj diris: Kiu do estas tiu, kiu ĉasis
ĉasaĵon kaj alportis al mi, kaj mi manĝis de ĉio, antaŭ
ol vi venis, kaj mi benis lin? kaj li restos ja benita! 34
Kiam Esav aŭdis la vortojn de sia patro, li ekkriis per
tre granda kaj maldolĉa krio, kaj diris al sia patro:
Benu ankaŭ min, ho mia patro! 35 Kaj tiu diris: Via
frato venis kun ruzo kaj prenis vian benon. 36 Kaj li
diris: Ĝuste do lia nomo estas Jakob, ĉar li submetis al
mi la piedon jam du fojojn; mian unuenaskitecon li
prenis, kaj jen li nun prenis mian benon! Kaj li diris:
Ĉu vi ne rezervis por mi benon? 37 Kaj Isaak respondis
kaj diris al Esav: Jen mi faris lin sinjoro super vi, kaj
ĉiujn liajn fratojn mi donis al li kiel servantojn, kaj
grenon kaj moston mi havigis al li; kion do mi faros
por vi, mia filo? 38 Kaj Esav diris al sia patro: Ĉu ĝi
estas la sola beno, kiun vi havas? benu ankaŭ min, ho
mia patro! Kaj Esav ekploris per laŭta voĉo. 39 Kaj lia
patro Isaak respondis kaj diris al li: Jen la graso de la
tero estu en via loko de loĝado Kaj la ĉiela roso de
supre; 40 Kaj per via glavo vi vivos, kaj vian fraton vi
servos; Sed kiam vi kontraŭbatalos, Vi deĵetos lian
jugon de via kolo. 41 Kaj Esav ekmalamis Jakobon pro
la beno, per kiu benis lin lia patro; kaj Esav diris en
sia koro: Baldaŭ venos la tagoj de funebro pro mia
patro, tiam mi mortigos mian fraton Jakob. 42 Kaj
oni raportis al Rebeka la vortojn de ŝia pli maljuna
filo Esav; tiam ŝi sendis kaj vokis sian pli junan filon
Jakob, kaj diris al li: Jen via frato Esav minacas mortigi
vin; 43 tial nun, mia filo, aŭskultu mian voĉon; kaj
leviĝu, forkuru al mia frato Laban en Ĥaran; 44 kaj
loĝu ĉe li kelkan tempon, ĝis kvietiĝos la furiozo de
via frato; 45 ĝis la kolero de via frato deturniĝos de vi,
kaj li forgesos, kion vi faris al li. Tiam mi sendos kaj
prenos vin de tie. Kial mi perdu vin ambaŭ en unu
tago? 46 Kaj Rebeka diris al Isaak: Tedis al mi la vivo
pro la Ĥetidinoj; se Jakob prenos edzinon el ĉi tiuj
Ĥetidinoj, el la filinoj de la lando, tiam por kio mi
vivu?

**28** Tiam Isaak alvokis Jakobon kaj benis lin, kaj
ordonis al li, dirante: Ne prenu edzinon el la
filinoj Kanaanaj. 2 Leviĝu, iru Mezopotamion, al la
domo de Betuel, la patro de via patrino, kaj prenu al
vi el tie edzinon el la filinoj de Laban, la frato de via
patrino. 3 Kaj Dio la Plejpotenca benu vin kaj fruktigu
vin kaj multigu vin, kaj kreskigu el vi amason da
popoloj. 4 Kaj Li donu al vi la benon de Abraham, al vi
kaj al via idaro kune kun vi, por ke vi heredu la landon
de via fremdeloĝado, kiun Dio donis al Abraham. 5 Kaj
Isaak forsendis Jakobon, kaj tiu iris Mezopotamion, al
Laban, la filo de Betuel la Siriano, frato de Rebeka,
patrino de Jakob kaj Esav. 6 Kiam Esav vidis, ke Isaak
benis Jakobon kaj sendis lin en Mezopotamion, por
ke li prenu al si el tie edzinon, kaj ke, benante lin, li
ordonis al li, dirante: Ne prenu edzinon el la filinoj
Kanaanaj; 7 kaj ke Jakob obeis sian patron kaj sian
patrinon kaj iris Mezopotamion: 8 tiam Esav vidis, ke
ne plaĉas la filinoj Kanaanaj al lia patro Isaak. 9 Kaj
Esav iris al Iŝmael kaj prenis al si Maĥalaton, filinon
de Iŝmael, filo de Abraham, fratinon de Nebajot, kiel
edzinon krom siaj aliaj edzinoj. 10 Kaj Jakob eliris el
Beer-Ŝeba kaj iris en la direkto al Ĥaran. 11 Li venis al
iu loko kaj restis tie, por pasigi la nokton, ĉar la suno
subiris. Kaj li prenis unu el la ŝtonoj de tiu loko kaj
metis ĝin sub sian kapon kaj kuŝiĝis en tiu loko. 12 Kaj
li sonĝis: jen ŝtuparo staras sur la tero, kaj ĝia supro
atingas la ĉielon, kaj jen anĝeloj de Dio iras sur ĝi
supren kaj malsupren. 13 Kaj jen la Eternulo staras sur
ĝi, kaj diras: Mi estas la Eternulo, la Dio de via patro
Abraham kaj la Dio de Isaak; la teron, sur kiu vi kuŝas,
Mi donos al vi kaj al via idaro. 14 Kaj via idaro estos
kiel la polvo de la tero, kaj vi disvastiĝos okcidenten
kaj orienten kaj norden kaj suden, kaj beniĝos per
vi kaj per via idaro ĉiuj gentoj de la tero. 15 Kaj Mi
estas kun vi, kaj Mi gardos vin ĉie, kien vi iros, kaj Mi
revenigos vin sur ĉi tiun teron; ĉar Mi ne forlasos
vin, ĝis Mi estos farinta tion, kion Mi diris al vi. 16
Kaj Jakob vekiĝis el sia dormo, kaj li diris: Vere, la
Eternulo estas en ĉi tiu loko, kaj mi ne sciis. 17 Kaj
li ektimis, kaj diris: Kiel timinda estas ĉi tiu loko! ĝi
estas nenio alia ol domo de Dio, kaj ĉi tie estas la
pordego de la ĉielo. 18 Kaj Jakob leviĝis frue matene,
kaj prenis la ŝtonon, kiun li estis metinta sub sian
kapon, kaj starigis ĝin kiel monumenton, kaj verŝis
oleon sur ĝian supron. 19 Kaj li donis al tiu loko la
nomon Bet-El; sed antaŭe la nomo de la urbo estis
Luz. 20 Kaj Jakob faris sanktan promeson, dirante: Se
Dio estos kun mi, kaj gardos min sur ĉi tiu vojo, kiun
mi iras, kaj donos al mi panon por manĝi kaj veston
por porti sur mi, 21 kaj mi revenos en paco al la domo
de mia patro, kaj la Eternulo estos por mi Dio: 22
tiam ĉi tiu ŝtono, kiun mi starigis kiel monumenton,

estos domo de Dio, kaj de ĉio, kion Vi donos al mi, mi
oferos al Vi dekonon.

**29** Kaj Jakob levis siajn piedojn kaj iris al la lando
de la orientanoj. 2 Kaj li vidis: jen estas puto
sur la kampo, kaj tri gregoj da ŝafoj kuŝas apud ĝi;
ĉar el tiu puto oni trinkigadis la gregojn; kaj granda
ŝtono estis sur la aperturo de la puto. 3 Kaj kiam tie
kunvenis ĉiuj gregoj, tiam oni deruladis la ŝtonon de
sur la aperturo kaj trinkigadis la ŝafojn kaj denove
remetadis la ŝtonon sur ĝian lokon, sur la aperturon
de la puto. 4 Kaj Jakob diris al ili: Fratoj miaj, ke kie
vi estas? Kaj ili diris: Ni estas el Ĥaran. 5 Kaj li diris
al ili: Ĉu vi konas Labanon, filon de Naĥor? Kaj ili
diris: Ni konas. 6 Kaj li diris al ili: Ĉu li bone fartas?
Kaj ili diris: Li fartas bone, kaj jen lia filino Raĥel
venas kun la ŝafoj. 7 Kaj li diris: De la tago restas ja
ankoraŭ multe, ankoraŭ ne estas la tempo, por kolekti
la gregojn; trinkigu la ŝafojn kaj iru, paŝtu. 8 Kaj ili
diris: Ni ne povas, ĝis kolektiĝos ĉiuj gregoj kaj oni
derulos la ŝtonon de sur la aperturo de la puto kaj
ni trinkigos la ŝafojn. 9 Dum li ankoraŭ parolis kun
ili, venis Raĥel kun la ŝafoj de sia patro, ĉar ŝi paŝtis
ilin. 10 Kaj kiam Jakob ekvidis Raĥelon, la filinon de
Laban, frato de lia patrino, kaj la ŝafojn de Laban,
frato de lia patrino, tiam Jakob alproksimiĝis, derulis
la ŝtonon de sur la aperturo de la puto, kaj trinkigis la
ŝafojn de Laban, la frato de lia patrino. 11 Kaj Jakob
kisis Raĥelon kaj laŭte ekploris. 12 Kaj Jakob diris
al Raĥel, ke li estas parenco de ŝia patro kaj filo de
Rebeka. Kaj ŝi kuris kaj diris al sia patro. 13 Kaj kiam
Laban aŭdis la sciigon pri Jakob, filo de lia fratino,
li kuris al li renkonte kaj ĉirkaŭprenis lin kaj kisis
lin kaj venigis lin en sian domon. Kaj tiu rakontis al
Laban ĉion. 14 Kaj Laban diris al li: Vi estas ja mia
osto kaj mia karno! Kaj li loĝis ĉe li tutan monaton. 15
Kaj Laban diris al Jakob: Ĉu pro tio, ke vi estas mia
parenco, vi devas servi min senpage? diru al mi, kion
mi devas pagi al vi? 16 Sed Laban havis du filinojn; la
nomo de la pli maljuna estis Lea, kaj la nomo de la pli
juna estis Raĥel. 17 La okuloj de Lea estis malsanaj,
sed Raĥel estis belforma kaj belvizaĝa. 18 Kaj Jakob
ekamis Raĥelon, kaj diris: Mi servos vin sep jarojn
pro Raĥel, via pli juna filino. 19 Tiam Laban diris: Pli
bone estas, ke mi donu ŝin al vi, ol ke mi donu ŝin al
alia viro; loĝu ĉe mi. 20 Kaj Jakob servis pro Raĥel sep
jarojn, kaj ili estis en liaj okuloj kiel kelke da tagoj, ĉar
li amis ŝin. 21 Kaj Jakob diris al Laban: Donu mian
edzinon, ĉar finiĝis mia tempo, kaj mi envenos al ŝi.
22 Kaj Laban kunvenigis ĉiujn homojn de tiu loko kaj
faris festenon. 23 Sed vespere li prenis sian filinon Lea
kaj enirigis ŝin al li; kaj tiu envenis al ŝi. 24 Kaj Laban
donis sian sklavinon Zilpa al Lea kiel sklavinon. 25
Sed matene montriĝis, ke tio estas Lea. Tiam li diris
al Laban: Kion do vi faris al mi! ĉu ne pro Raĥel mi
servis vin? kial do vi min trompis? 26 Tiam Laban
diris: En nia loko ne estas moro, ke oni donu la pli
junan antaŭ ol la pli maljunan. 27 Pasigu semajnon
kun ĉi tiu, tiam mi donos al vi ankaŭ tiun, pro servo,
kiun vi servos ĉe mi ankoraŭ aliajn sep jarojn. 28
Kaj Jakob faris tiel kaj pasigis semajnon kun ĉi tiu.
Kaj Laban donis al li sian filinon Raĥel kiel edzinon.
29 Kaj Laban donis al sia filino Raĥel sian sklavinon
Bilha kiel sklavinon. 30 Kaj Jakob envenis ankaŭ al
Raĥel, kaj li amis Raĥelon pli ol Lean, kaj li servis ĉe li
ankoraŭ aliajn sep jarojn. 31 Kiam la Eternulo vidis,
ke Lea estas malamata, Li malŝlosis ŝian uteron; sed
Raĥel estis senfrukta. 32 Kaj Lea gravediĝis kaj naskis
filon, kaj ŝi donis al li la nomon Ruben, ĉar ŝi diris: La
Eternulo vidis mian mizeron, kaj nun mia edzo min
amos. 33 Kaj ŝi denove gravediĝis kaj naskis filon. Kaj
ŝi diris: La Eternulo aŭdis, ke mi estas malamata, tial
Li donis al mi ankaŭ ĉi tiun; kaj ŝi donis al li la nomon
Simeon. 34 Kaj ŝi denove gravediĝis kaj naskis filon.
Kaj ŝi diris: La nunan fojon mia edzo aliĝos al mi, ĉar
mi naskis al li tri filojn; tial al li estis donita la nomo
Levi. 35 Kaj ŝi denove gravediĝis kaj naskis filon. Kaj ŝi
diris: Nun mi dankos la Eternulon; tial ŝi donis al li la
nomon Jehuda. Kaj ŝi ĉesis naski.

**30** Kiam Raĥel vidis, ke ŝi ne naskas al Jakob, ŝi
enviis sian fratinon, kaj ŝi diris al Jakob: Donu
al mi infanojn, ĉar alie mi mortos. 2 Kaj Jakob forte
ekkoleris Raĥelon, kaj li diris: Ĉu mi anstataŭas Dion,
kiu rifuzis al vi frukton de ventro? 3 Kaj ŝi diris: Jen
estas mia sklavino Bilha; envenu al ŝi, ke ŝi nasku sur
miaj genuoj kaj ke mi ankaŭ ricevu filojn per ŝi. 4 Kaj
ŝi donis al li sian sklavinon Bilha kiel edzinon, kaj
Jakob envenis al ŝi. 5 Kaj Bilha gravediĝis kaj naskis al
Jakob filon. 6 Kaj Raĥel diris: Dio min juĝis kaj aŭdis
mian voĉon kaj donis al mi filon; tial ŝi donis al li la
nomon Dan. 7 Kaj Bilha, la sklavino de Raĥel, denove
gravediĝis kaj naskis duan filon al Jakob. 8 Tiam Raĥel
diris: Per Dia lukto mi luktis kun mia fratino, kaj mi

venkis; kaj ŝi donis al li la nomon Naftali. **9** Kiam Lea
vidis, ke ŝi ĉesis naski, ŝi prenis sian sklavinon Zilpa
kaj donis ŝin al Jakob kiel edzinon. **10** Kaj Zilpa, la
sklavino de Lea, naskis al Jakob filon. **11** Kaj Lea diris:
Venis feliĉo! kaj ŝi donis al li la nomon Gad. **12** Kaj
Zilpa, la sklavino de Lea, naskis duan filon al Jakob.
**13** Kaj Lea diris: Por mia bono; ĉar la virinoj diros,
ke estas al mi bone. Kaj ŝi donis al li la nomon Aŝer.
**14** Ruben iris en la tempo de rikoltado de tritiko kaj
trovis mandragorojn sur la kampo, kaj li alportis ilin
al sia patrino Lea. Kaj Raĥel diris al Lea: Donu al mi
el la mandragoroj de via filo. **15** Sed tiu diris al ŝi:
Ĉu ne sufiĉas al vi, ke vi prenis mian edzon, kaj vi
volas preni ankaŭ la mandragorojn de mia filo? Tiam
Raĥel diris: Nu, li kuŝu kun vi ĉi tiun nokton por la
mandragoroj de via filo. **16** Kiam Jakob venis de la
kampo vespere, Lea eliris al li renkonte, kaj diris: Al
mi venu, ĉar mi aĉetis vin per la mandragoroj de mia
filo. Kaj li kuŝis kun ŝi en tiu nokto. **17** Kaj Dio aŭdis
Lean, kaj ŝi gravediĝis kaj naskis al Jakob kvinan filon.
**18** Kaj Lea diris: Dio donis al mi rekompencon por tio,
ke mi donis mian sklavinon al mia edzo; kaj ŝi donis al
li la nomon Isaĥar. **19** Kaj Lea denove gravediĝis kaj
naskis sesan filon al Jakob. **20** Kaj Lea diris: Havigis al
mi Dio bonan havon; nun mia edzo loĝos ĉe mi, ĉar
mi naskis al li ses filojn. Kaj ŝi donis al li la nomon
Zebulun. **21** Kaj poste ŝi naskis filinon, kaj ŝi donis
al ŝi la nomon Dina. **22** Kaj Dio rememoris Raĥelon,
kaj Dio elaŭdis ŝin kaj malŝlosis ŝian uteron. **23** Kaj ŝi
gravediĝis kaj naskis filon. Kaj ŝi diris: Dio forprenis
mian malhonoron. **24** Kaj ŝi donis al li la nomon Jozef,
dirante: La Eternulo aldonos al mi alian filon. **25** Kiam
Raĥel naskis Jozefon, Jakob diris al Laban: Forliberigu
min, kaj mi iros al mia loko kaj al mia lando. **26** Donu
miajn edzinojn kaj miajn infanojn, pro kiuj mi servis
vin, kaj mi iros; ĉar vi konas la servon, per kiu mi
vin servis. **27** Kaj Laban diris al li: Ho, se mi povus
akiri vian favoron! mi spertis, ke la Eternulo benis
min pro vi. **28** Kaj li diris: Difinu, kian rekompencon
mi ŝuldas al vi, kaj mi donos. **29** Kaj tiu diris al li:
Vi scias, kiel mi servis vin kaj kia fariĝis via brutaro
ĉe mi; **30** ĉar malmulte vi havis antaŭ mi, sed nun
ĝi multe vastiĝis; kaj la Eternulo benis vin post mia
veno; kaj nun kiam mi laboros ankaŭ por mia domo?
**31** Kaj Laban diris: Kion mi donu al vi? Kaj Jakob diris:
Donu al mi nenion; sed se vi faros al mi jenon, tiam
mi denove paŝtos kaj gardos viajn ŝafojn: **32** mi pasos
hodiaŭ tra via tuta ŝafaro; apartigu el ĝi ĉiun ŝafon
mikskoloran kaj makulitan kaj ĉiun bruton nigran
inter la ŝafoj, kaj makulitan kaj mikskoloran inter la
kaproj; kaj ili estu mia rekompenco. **33** Kaj respondos
por mi mia justeco en la morgaŭa tago, kiam vi venos
vidi mian rekompencon; ĉiu el la kaproj, kiu ne estos
mikskolora aŭ makulita, kaj ĉiu el la ŝafoj, kiu ne estos
nigra, estu rigardata kiel ŝtelita de mi. **34** Kaj Laban
diris: Ĝi estu, kiel vi diris. **35** Kaj li apartigis en tiu
tago la virkaprojn striitajn kaj makulitajn kaj ĉiujn
kaprinojn mikskolorajn kaj makulitajn, ĉiujn, kiuj
havis sur si iom da blankaĵo, kaj ĉiujn nigrajn ŝafojn;
kaj li transdonis ilin en la manojn de siaj filoj. **36** Kaj li
faris interspacon de tritaga irado inter si kaj Jakob. Kaj
Jakob paŝtis la restintajn ŝafojn de Laban. **37** Kaj Jakob
prenis al si bastonojn el verdaj poploj, migdalarboj,
kaj platanarboj, kaj senŝeligis sur ili blankajn striojn
tiamaniere, ke la blankaĵo sur la bastonoj elmontriĝis.
**38** Kaj li metis la skrapitajn bastonojn antaŭ la ŝafoj en
la akvotrinkigajn kanalojn, al kiuj la ŝafoj venadis por
trinki, kaj ili gravediĝadis, kiam ili venadis trinki. **39**
Kaj la ŝafoj gravediĝis super la bastonoj, kaj ili naskis
ŝafidojn striitajn, mikskolorajn, kaj makulitajn. **40** Kaj
la ŝafidojn Jakob apartigis, kaj li turnis la vizaĝojn de
la brutoj kontraŭ la striitajn kaj kontraŭ la nigrajn
brutojn de Laban; sed siajn brutarojn li apartigis kaj
ne almiksis ilin al la brutoj de Laban. **41** Ĉiufoje, kiam
pasiiĝis brutoj fortaj, Jakob metis la bastonojn en
la kanalojn antaŭ la okuloj de la brutoj, por ke ili
pasiiĝu antaŭ la bastonoj; **42** sed kiam la brutoj estis
malfortaj, li ne metis. Tiamaniere la malfortaj fariĝis
apartenaĵo de Laban, kaj la fortaj fariĝis apartenaĵo
de Jakob. **43** Kaj tiu homo fariĝis eksterordinare riĉa,
kaj li havis multe da brutoj kaj sklavinojn kaj sklavojn
kaj kamelojn kaj azenojn.

**31** Li aŭdis, ke la filoj de Laban parolis jene: Jakob
forprenis la tutan havon de nia patro, kaj el la
havo de nia patro li akiris la tutan riĉecon. **2** Kaj Jakob
vidis laŭ la vizaĝo de Laban, ke li ne estas rilate al li
tia, kia li estis hieraŭ kaj antaŭhieraŭ. **3** Kaj la Eternulo
diris al Jakob: Reiru en la landon de viaj patroj kaj en
vian naskiĝlandon, kaj Mi estos kun vi. **4** Tiam Jakob
sendis kaj vokis Raĥelon kaj Lean sur la kampon al
sia brutaro; **5** kaj li diris al ili: Mi vidas laŭ la vizaĝo
de via patro, ke li ne estas rilate al mi tia, kia li estis
hieraŭ kaj antaŭhieraŭ; sed la Dio de mia patro estis

kun mi. 6 Vi scias, ke per ĉiuj miaj fortoj mi servis
vian patron. 7 Sed via patro trompis min kaj dekfoje
ŝanĝis mian laborpagon; tamen Dio ne lasis lin fari al
mi malbonon. 8 Kiam li diris: Mikskoloraj estu via
rekompenco — ĉiuj brutoj naskis idojn mikskolorajn;
kaj kiam li diris: Striitaj estu via rekompenco — ĉiuj
brutoj naskis striitajn. 9 Tiamaniere Dio forprenis la
brutojn de via patro kaj donis al mi. 10 En la tempo,
kiam la brutoj pasiiĝis, mi levis miajn okulojn kaj vidis
en sonĝo, ke la virbestoj, kiuj leviĝis sur la brutojn,
estas striitaj, mikskoloraj, kaj makulitaj. 11 Kaj anĝelo
de Dio diris al mi en la sonĝo: Jakob! kaj mi diris:
Jen mi estas. 12 Kaj li diris: Levu viajn okulojn kaj
vidu: ĉiuj virbestoj, kiuj leviĝis sur la brutojn, estas
striitaj, mikskoloraj, kaj makulitaj, ĉar Mi vidis ĉion,
kion Laban faras al vi. 13 Mi estas la Dio el Bet-El, kie
vi verŝis oleon sur la monumenton kaj kie vi faris
sanktan promeson al Mi. Nun leviĝu, eliru el ĉi tiu
lando kaj reiru en la landon de via naskiĝo. 14 Kaj
Raĥel kaj Lea respondis kaj diris al li: Ĉu ni havas
ankoraŭ parton kaj heredon en la domo de nia patro?
15 Li rigardas ja nin kiel fremdulinojn; ĉar li vendis nin
kaj eĉ formanĝis nian monon. 16 Ĉar la tuta riĉo, kiun
Dio forprenis de nia patro, apartenas al ni kaj al niaj
infanoj. Kaj nun ĉion, kion Dio al vi diris, faru. 17 Jakob
leviĝis, kaj metis siajn infanojn kaj siajn edzinojn sur
la kamelojn. 18 Kaj li forkondukis sian tutan brutaron
kaj sian tutan havon, kiun li akiris, sian propraĵon,
kiun li akiris en Mezopotamio, por iri al sia patro
Isaak en la landon Kanaanan. 19 Laban estis foririnta,
por tondi siajn ŝafojn; tiam Raĥel ŝtelis la domajn
diojn de sia patro. 20 Jakob trompis la atenton de
Laban la Siriano, ne dirante al li, ke li forkuras. 21
Kaj li rapide foriris kune kun ĉio, kion li havis. Kaj li
transpasis la Riveron kaj direktiĝis al la monto Gilead.
22 Oni diris al Laban en la tria tago, ke Jakob forkuris.
23 Tiam li prenis kun si siajn fratojn, kaj kuris post li
distancon de sep tagoj kaj kuratingis lin sur la monto
Gilead. 24 Tiam Dio aperis al Laban la Siriano nokte en
la sonĝo, kaj diris al li: Gardu vin, ke vi ne parolu kun
Jakob bone nek malbone. 25 Laban kuratingis Jakobon.
Jakob starigis sian tendon sur la monto, kaj Laban
aranĝis siajn fratojn ankaŭ sur la monto Gilead. 26 Kaj
Laban diris al Jakob: Kion vi faris? vi trompis min kaj
forkondukis miajn filinojn kvazaŭ militkaptitojn! 27
Kial vi forkuris sekrete kaj kaŝe de mi, kaj ne diris al
mi? Mi foririgus vin en gajeco kaj kun kantoj, kun
tamburino kaj harpo. 28 Vi eĉ ne lasis min kisi miajn
infanojn kaj filinojn! malsaĝe vi agis. 29 Mi havas
forton en mia mano, por fari al vi malbonon; sed la
Dio de via patro hieraŭ diris al mi jene: Gardu vin, ke
vi ne parolu kun Jakob bone aŭ malbone. 30 Kaj se
vi nun foriris, ĉar vi forte deziris esti en la domo de
via patro, kial do vi ŝtelis miajn diojn? 31 Tiam Jakob
respondis kaj diris al Laban: Mi timis; mi pensis, ke
eble vi forrabos de mi viajn filinojn. 32 Sed tiu, ĉe
kiu vi trovos viajn diojn, mortu. En la ĉeesto de niaj
parencoj serĉu ĉe mi tion, kio estas via, kaj prenu al
vi. Jakob ne sciis, ke Raĥel ilin ŝtelis. 33 Tiam Laban
eniris en la tendon de Jakob kaj en la tendon de Lea
kaj en la tendon de la du sklavinoj, kaj li ne trovis. Kaj
li eliris el la tendo de Lea kaj eniris en la tendon de
Raĥel. 34 Sed Raĥel prenis la domajn diojn kaj metis
ilin sub la selon de la kamelo kaj sidiĝis sur ili. Kaj
Laban palpe esploris la tutan tendon kaj ne trovis.
35 Kaj ŝi diris al sia patro: Mia sinjoro ne koleru, ke
mi ne povas stariĝi antaŭ vi, ĉar mi havas la virinan
ordinaraĵon. Kaj li serĉis kaj ne trovis la domajn diojn.
36 Kaj Jakob ekkoleris kaj disputis kun Laban. Kaj
Jakob diris al Laban: Kia estas mia kulpo, kia estas
mia peko, ke vi persekutas min? 37 Vi trapalpis ĉiujn
miajn apartenaĵojn; kion vi trovis el la apartenaĵoj de
via domo? elmetu ĉi tie antaŭ miaj parencoj kaj viaj,
kaj ili juĝu inter ni ambaŭ. 38 Jam dudek jarojn mi
estas ĉe vi; viaj ŝafoj kaj kaproj ne estis seninfanaj; la
virŝafojn el via brutaro mi ne manĝis; 39 kion sovaĝaj
bestoj disŝiris, tion mi ne alportis al vi: ĝi estis mia
malprofito; de mi vi postulis ĉion, kio estis ŝtelita en
tago aŭ ŝtelita en nokto; 40 dum la tago min konsumis
la varmego, kaj dum la nokto la malvarmo; kaj dormo
kuris for de miaj okuloj. 41 Tiaj estis la dudek jaroj,
dum kiuj mi servis vin en via domo, dek kvar jarojn
pro viaj du filinoj kaj ses jarojn pro viaj brutoj; kaj
vi ŝanĝis mian laborpagon dekfoje. 42 Se ne estus
kun mi la Dio de mia patro, la Dio de Abraham kaj
Timo de Isaak, vi nun foririgus min kun nenio. Mian
mizeron kaj la laboron de miaj manoj vidis Dio kaj
ĝustigis vin hieraŭ. 43 Tiam Laban respondis kaj diris
al Jakob: La filinoj estas miaj filinoj, kaj la infanoj
estas miaj infanoj, kaj la brutoj estas miaj brutoj,
kaj ĉio, kion vi vidas, estas mia; sed kion mi povas
fari hodiaŭ al miaj filinoj, kaj al iliaj infanoj, kiujn
ili naskis? 44 Nun ni faru interligon, mi kaj vi, kaj
ĝi estu atesto inter mi kaj vi. 45 Tiam Jakob prenis

ŝtonon kaj starigis ĝin kiel memorsignon. 46 Kaj Jakob diris al siaj parencoj: Kolektu ŝtonojn. Kaj ili prenis ŝtonojn kaj faris monteton; kaj ili manĝis tie sur la monteto. 47 Kaj Laban donis al ĝi la nomon Jegar-Sahaduta, sed Jakob donis al ĝi la nomon Galeed. 48 Laban diris: Ĉi tiu monteto estu nun atesto inter mi kaj vi; tial ĝi ricevis la nomon Galeed; 49 ankaŭ la nomon Micpa; ĉar li diris: Dio observu inter mi kaj vi, kiam ni malaperos unu de la alia. 50 Se vi agos malbone kontraŭ miaj filinoj kaj se vi prenos aliajn edzinojn krom miaj filinoj, tiam, se neniu estos ĉe ni, vidu, ke Dio estas atestanto inter mi kaj vi. 51 Kaj Laban diris al Jakob: Jen estas ĉi tiu monteto, kaj jen estas la memorsigno, kiun mi starigis inter mi kaj vi; 52 atesto estu ĉi tiu monteto, kaj atesto estu la memorsigno, ke mi ne transiros al vi trans ĉi tiun monteton kaj vi ne transiros al mi trans ĉi tiun monteton kaj trans la memorsignon por malbono. 53 La Dio de Abraham kaj la Dio de Naĥor juĝu inter ni, la Dio de ilia patro. Kaj Jakob ĵuris al li per la Timo de sia patro Isaak. 54 Kaj Jakob oferbuĉis oferon sur la monto, kaj li invitis siajn parencojn manĝi panon; kaj ili manĝis panon kaj tradormis la nokton sur la monto. 55 Laban leviĝis frue matene kaj kisis siajn infanojn kaj siajn filinojn kaj benis ilin, kaj foriris; kaj Laban reiris al sia loko.

**32** Kaj Jakob iris sian vojon. Kaj renkontiĝis kun li anĝeloj de Dio. 2 Kaj Jakob diris, kiam li ilin vidis: Tio estas militistaro de Dio; kaj li donis al tiu loko la nomon Maĥanaim. 3 Jakob sendis antaŭ si senditojn al sia frato Esav, en la landon Seir, en la regionon de Edom. 4 Kaj li ordonis al ili jene: Tiele diru al mia sinjoro Esav: Jen kion diris via sklavo Jakob: Mi loĝis ĉe Laban kaj restis tie ĝis nun. 5 Mi havas bovojn kaj azenojn, ŝafojn kaj sklavojn kaj sklavinojn; kaj mi sendas, por sciigi mian sinjoron, por ke mi akiru vian favoron. 6 Kaj la senditoj revenis al Jakob, kaj diris: Ni venis al via frato Esav; li iras renkonte al vi, kaj kvarcent homoj iras kune kun li. 7 Tiam Jakob tre ektimis kaj afliktiĝis. Kaj li dividis la homojn, kiuj estis kun li, kaj la ŝafojn kaj la bovojn kaj la kamelojn, en du taĉmentojn; 8 kaj li diris: Se Esav venos al unu taĉmento kaj venkobatos ĝin, tiam la restinta taĉmento sin savos. 9 Kaj Jakob diris: Dio de mia patro Abraham kaj Dio de mia patro Isaak, Eternulo, kiu diris al mi: Reiru en vian landon kaj en vian naskiĝlokon, kaj Mi faros al vi bonon; 10 mi estas tro malgranda por ĉiuj favorkoraĵoj kaj por la tuta bonaĵo, kiun Vi faris al Via sklavo; ĉar kun mia bastono mi transiris ĉi tiun Jordanon, kaj nun mi havas du taĉmentojn. 11 Savu min de la mano de mia frato, de la mano de Esav; ĉar mi timas lin, ke li eble venos kaj mortigos ĉe mi patrinon kun la infanoj. 12 Vi diris ja: Mi faros al vi bonon, kaj Mi faros vian idaron tia, kia estas la apudmara sablo, kiun oni ne povas kalkuli pro multegeco. 13 Kaj li pasigis tie la nokton. Kaj li prenis el tio, kion li havis sub la mano, donacon por sia frato Esav: 14 ducent kaprinojn kaj dudek virkaprojn, ducent ŝafinojn kaj dudek virŝafojn, 15 tridek mamnutrantajn kamelojn kun iliaj idoj, kvardek bovinojn kaj dek virbovojn, dudek azeninojn kaj dek azenidojn. 16 Kaj li transdonis en la manojn de siaj sklavoj ĉiun gregon aparte, kaj li diris al siaj sklavoj: Iru antaŭ mi kaj lasu liberan interspacon inter unu grego kaj alia. 17 Kaj al la unua li ordonis jene: Se vin renkontos mia frato Esav, kaj demandos vin: Kies vi estas? kaj kien vi iras? kaj al kiu apartenas tio, kio estas antaŭ vi? 18 tiam diru: Al via sklavo Jakob; ĝi estas donaco, sendata al mia sinjoro Esav, kaj jen li ankaŭ mem estas post ni. 19 Kaj li ordonis ankaŭ al la dua, ankaŭ al la tria, ankaŭ al ĉiuj, kiuj iris post la gregoj, dirante: Tiamaniere parolu al Esav, kiam vi lin renkontos. 20 Kaj diru: Jen ankaŭ via sklavo Jakob iras post ni. Ĉar li pensis: Mi pardonemigos lin per la donaco, kiu iras antaŭ mi, kaj poste mi vidos lian vizaĝon; eble li akceptos min favore. 21 Kaj la donaco pasis antaŭ li; sed li pasigis tiun nokton en la tendaro. 22 Kaj li leviĝis en tiu nokto, kaj prenis siajn du edzinojn kaj siajn du sklavinojn kaj siajn dek unu infanojn, kaj transpasis la vadejon de Jabok. 23 Kaj li prenis ilin kaj transirigis ilin trans la riveron, kaj transigis tion, kion li havis. 24 Kaj Jakob restis sola. Kaj iu luktis kun li ĝis la apero de la matenruĝo. 25 Vidinte, ke li ne povas lin venki, tiu tuŝis la artikon de lia femuro; kaj la femuro de Jakob elartikiĝis, dum li luktis kun tiu. 26 Kaj tiu diris: Forliberigu min, ĉar leviĝis la matenruĝo. Sed li diris: Mi ne forliberigos vin, antaŭ ol vi min benos. 27 Kaj tiu diris al li: Kia estas via nomo? Kaj li respondis: Jakob. 28 Tiam tiu diris: Ne Jakob estu de nun via nomo, sed Izrael; ĉar vi luktis kun Dio kaj kun homoj, kaj vi venkis. 29 Kaj Jakob demandis, dirante: Diru vian nomon. Sed tiu diris: Por kio vi demandas mian nomon? Kaj li benis

lin tie. 30 Kaj Jakob donis al tiu loko la nomon Penuel,
dirante: Ĉar mi vidis Dion vizaĝon kontraŭ vizaĝo,
kaj mia animo saviĝis. 31 La suno leviĝis antaŭ li,
kiam li trapasis Penuelon; kaj li lamis per sia femuro.
32 Tial la Izraelidoj ne manĝas ĝis la nuna tempo la
tendenon, kiu estas sur la artiko de la femuro, ĉar tiu
tuŝis la femuran artikon de Jakob ĉe la tendeno.

**33** Jakob levis siajn okulojn, kaj vidis, ke jen venas
Esav kaj kun li kvarcent homoj. Tiam li dividis la
infanojn de Lea kaj de Raĥel kaj de la du sklavinoj. 2
Kaj li starigis la sklavinojn kaj iliajn infanojn antaŭe,
Lean kun ŝiaj infanoj poste, kaj Raĥelon kun Jozef en
la fino. 3 Kaj li mem pasis preter ilin, kaj kliniĝis ĝis la
tero sep fojojn, antaŭ ol li atingis sian fraton. 4 Sed
Esav kuris al li renkonte kaj ĉirkaŭprenis lin, kaj ĵetis
sin sur lian kolon kaj kisis lin; kaj ili ploris. 5 Esav levis
siajn okulojn kaj ekvidis la virinojn kaj la infanojn,
kaj diris: Kiuj estas ĉe vi ĉi tiuj? Jakob respondis:
La infanoj, kiujn Dio favore donis al via sklavo. 6
Tiam alproksimiĝis la sklavinoj, ili kaj iliaj infanoj, kaj
profunde kliniĝis. 7 Poste alproksimiĝis ankaŭ Lea kaj
ŝiaj infanoj kaj kliniĝis; fine alproksimiĝis Jozef kaj
Raĥel kaj kliniĝis. 8 Tiam Esav diris: Kio estas tiu tuta
taĉmento, kiun mi renkontis? Kaj Jakob respondis:
Por akiri la favoron de mia sinjoro. 9 Sed Esav diris:
Mi havas multe, mia frato; kio apartenas al vi, tio
restu ĉe vi. 10 Kaj Jakob diris: Ho ne! se mi akiris vian
favoron, prenu mian donacon el mia mano; ĉar mi
vidis vian vizaĝon, kvazaŭ mi vidus la vizaĝon de Dio,
kaj vi montriĝis favora al mi. 11 Prenu mian benon,
kiu estas alportita al vi; ĉar Dio favore donis al mi
kaj mi havas ĉion. Kaj li insistis, kaj tiu prenis. 12 Kaj
Esav diris: Ni leviĝu kaj iru, kaj mi iros apud vi. 13 Sed
Jakob diris al li: Mia sinjoro scias, ke la infanoj estas
malfortaj, kaj la ŝafoj kaj bovoj ĉe mi estas tro junaj;
se oni pelos ilin dum unu tago, la brutaro mortos.
14 Mia sinjoro iru antaŭ sia sklavo, kaj mi kondukos
malrapide, kiel iros la brutoj, kiuj estas antaŭ mi, kaj
kiel iros la infanoj, ĝis mi venos al mia sinjoro en Seir.
15 Tiam Esav diris: Mi restigos ĉe vi iujn el la homoj,
kiuj estas kun mi. Sed Jakob diris: Por kio? lasu min
nur posedi la favoron de mia sinjoro. 16 Kaj en tiu
tago Esav returne foriris sian vojon al Seir. 17 Kaj
Jakob ekiris al Sukot kaj konstruis al si domon, kaj
por siaj brutoj li faris kabanojn; tial la loko ricevis
la nomon Sukot. 18 Veninte el Mezopotamio, Jakob
alvenis bonstate en la urbo de Ŝeĥem, kiu estas en la
lando Kanaana; kaj li starigis sian tendaron antaŭ la
urbo. 19 Kaj la kampoparton, sur kiu li starigis sian
tendon, li aĉetis el la manoj de la filoj de Ĥamor, la
patro de Ŝeĥem, por cent kesitoj. 20 Kaj li starigis tie
altaron, kaj li nomis ĝin El, la Dio de Izrael.

**34** Dina, la filino de Lea, kiun ŝi naskis al Jakob,
eliris, por vidi la filinojn de la lando. 2 Kaj vidis
ŝin Ŝeĥem, filo de Ĥamor la Ĥivido, princo de la
lando, kaj li prenis ŝin kaj kuŝis kun ŝi kaj faris al
ŝi perfortaĵon. 3 Kaj algluiĝis lia animo al Dina, la
filino de Jakob, kaj li ekamis la junulinon kaj parolis
al la koro de la junulino. 4 Kaj Ŝeĥem diris al sia
patro Ĥamor jene: Prenu por mi ĉi tiun knabinon kiel
edzinon. 5 Jakob aŭdis, ke li senhonorigis lian filinon
Dina; sed liaj filoj estis kun liaj brutoj sur la kampo,
tial Jakob silentis ĝis ilia veno. 6 Kaj Ĥamor, la patro
de Ŝeĥem, eliris al Jakob, por paroli kun li. 7 Sed la
filoj de Jakob venis de la kampo. Kiam ili aŭdis, la viroj
ĉagreniĝis kaj forte koleriĝis, ke li faris malnoblaĵon
en Izrael, kuŝinte kun la filino de Jakob, kio ne devis
esti farata. 8 Ĥamor ekparolis al ili, dirante: Ŝeĥem,
mia filo, deziregas per sia animo vian filinon; donu
ŝin al li kiel edzinon. 9 Kaj boparenciĝu kun ni: viajn
filinojn donu al ni, kaj niajn filinojn prenu al vi. 10
Kaj loĝu kun ni, kaj la lando estos antaŭ vi; loĝu
kaj faru negocojn kaj akiru posedaĵojn en ĝi. 11 Kaj
Ŝeĥem diris al ŝia patro kaj al ŝiaj fratoj: Estu favoraj
al mi; kaj kion vi diros al mi, mi donos. 12 Postulu
de mi tre grandan doton kaj donacojn, kaj mi donos,
kion vi diros al mi; nur donu al mi la junulinon kiel
edzinon. 13 Kaj la filoj de Jakob respondis al Ŝeĥem
kaj al lia patro Ĥamor ruze, kaj parolis tiel pro tio, ke
li senhonorigis ilian fratinon Dina; 14 kaj ili diris al ili:
Ni ne povas fari tion kaj doni nian fratinon al viro, kiu
ne estas cirkumcidita; ĉar tio estus por ni hontindaĵo.
15 Nur tiam ni donos al vi nian konsenton, se vi estos
kiel ni kaj cirkumcidos ĉe vi ĉiun virseksulon. 16 Tiam
ni donos niajn filinojn al vi kaj viajn filinojn ni prenos
al ni, kaj ni loĝos kun vi, kaj ni estos unu popolo. 17
Sed se vi ne konsentos lasi cirkumcidi vin, tiam ni
prenos nian filinon kaj foriros. 18 Ilia parolo plaĉis al
Ĥamor, kaj al Ŝeĥem, la filo de Ĥamor. 19 Kaj la junulo
ne prokrastis fari la aferon, ĉar li deziris la filinon de
Jakob; kaj li estis la plej honorata inter ĉiuj domanoj
de sia patro. 20 Kaj Ĥamor kaj lia filo Ŝeĥem venis al

la pordego de sia urbo, kaj ekparolis al la loĝantoj
de sia urbo, dirante: 21 Tiuj homoj estas pacaj kun
ni; tial ili loĝu en la lando kaj faru en ĝi negocojn;
la lando estas ja grandspaca por ili. Iliajn filinojn ni
prenu al ni kiel edzinojn, kaj niajn filinojn ni donu al
ili. 22 Sed nur en tia okazo tiuj homoj konsentas loĝi
kun ni kaj esti unu popolo, se ni cirkumcidos ĉe ni
ĉiun virseksulon, kiel ili estas cirkumciditaj. 23 Ilia
akiritaĵo kaj havaĵo kaj ĉiuj iliaj brutoj fariĝos ja niaj,
se ni nur donos al ili nian konsenton kaj ili loĝos kun
ni. 24 Kaj obeis al Ĥamor kaj al lia filo Ŝeĥem ĉiuj
elirantaj el la pordego de lia urbo; kaj cirkumcidiĝis
ĉiuj virseksuloj, ĉiuj elirantaj el la pordego de lia
urbo. 25 En la tria tago, kiam ili estis malsanaj, du
filoj de Jakob, Simeon kaj Levi, fratoj de Dina, prenis
ĉiu sian glavon kaj venis sentime en la urbon kaj
mortigis ĉiujn virseksulojn. 26 Kaj Ĥamoron kaj lian
filon Ŝeĥem ili mortigis per glavo, kaj prenis Dinan el
la domo de Ŝeĥem kaj eliris. 27 La filoj de Jakob venis
al la mortigitoj, kaj prirabis la urbon pro tio, ke ili
senhonorigis ilian fratinon. 28 Iliajn ŝafojn kaj iliajn
bovojn kaj iliajn azenojn, kaj ĉion, kio estis en la urbo,
kaj tion, kio estis sur la kampo, ili prenis. 29 Kaj ilian
tutan riĉon kaj ĉiujn iliajn infanojn kaj iliajn edzinojn
ili malliberigis, kaj rabis ĉion, kio estis en la domoj.
30 Tiam Jakob diris al Simeon kaj al Levi: Vi afliktis
min kaj faris min malaminda por la loĝantoj de la
lando, por la Kanaanidoj kaj Perizidoj. Mi havas ja
malmulte da homoj; kiam ili kolektiĝos kontraŭ mi
kaj venkobatos min, tiam estos ekstermita mi kaj mia
domo. 31 Sed ili diris: Ĉu estas permesite agi kun nia
fratino kiel kun publikulino?

**35** Kaj Dio diris al Jakob: Leviĝu, iru al Bet-El kaj
loĝu tie; kaj faru tie altaron al Dio, kiu aperis al
vi, kiam vi kuris de via frato Esav. 2 Tiam Jakob diris
al sia domanaro, kaj al ĉiuj, kiuj estis kun li: Forigu
la fremdajn diojn, kiuj estas inter vi, kaj puriĝu kaj
ŝanĝu viajn vestojn. 3 Kaj ni leviĝu, kaj ni iru al Bet-
El; kaj mi faros tie altaron al Dio, kiu atentis min en
la tago de mia mizero, kaj estis kun mi sur la vojo,
kiun mi iris. 4 Kaj ili donis al Jakob ĉiujn fremdajn
diojn, kiuj estis en iliaj manoj, kaj la ringojn, kiuj estis
en iliaj oreloj; kaj Jakob enfosis ilin sub la kverko,
kiu estis apud Ŝeĥem. 5 Kaj ili ekiris. Kaj timo de
Dio venis sur la urbojn, kiuj estis ĉirkaŭ ili, kaj ili ne
persekutis la filojn de Jakob. 6 Jakob venis al la urbo
Luz, kiu estas en la lando Kanaana kaj havas ankaŭ
la nomon Bet-El, li kaj ĉiuj homoj, kiuj estis kun li.
7 Kaj li konstruis tie altaron, kaj donis al la loko la
nomon El-Bet-El; ĉar tie aperis al li Dio, kiam li kuris
de sia frato. 8 Tiam mortis Debora, la mamnutrintino
de Rebeka, kaj oni ŝin enterigis apud Bet-El, sub la
kverko. Kaj tiu loko ricevis la nomon Alon-Baĥut.
9 Kaj denove Dio aperis al Jakob, kiam li revenis el
Mezopotamio, kaj benis lin. 10 Kaj Dio diris al li: Via
nomo estas Jakob; tamen ne plue estu nomata Jakob,
sed Izrael estu via nomo. Kaj Li donis al li la nomon
Izrael. 11 Kaj Dio diris al li: Mi estas Dio la Plejpotenca;
fruktu kaj multiĝu; popolo kaj popolaro fariĝos el
vi, kaj reĝoj eliros el via lumbo. 12 Kaj la landon,
kiun Mi donis al Abraham kaj al Isaak, Mi donos al
vi, kaj al via idaro post vi Mi donos la landon. 13
Kaj Dio forleviĝis de li sur la loko, kie Li parolis kun
li. 14 Jakob starigis monumenton sur la loko, kie Li
parolis kun li, monumenton ŝtonan; kaj li verŝis sur
ĝin verŝoferon kaj verŝis sur ĝin oleon. 15 Kaj al la
loko, kie Dio parolis kun li, Jakob donis la nomon Bet-
El. 16 Kaj ili forlasis Bet-Elon. Kiam restis ankoraŭ
negranda interspaco, por veni al Efrata, Raĥel naskis,
kaj ŝia akuŝiĝo estis malfacila. 17 Dum ŝia akuŝiĝa
suferado la akuŝistino diris al ŝi: Ne timu, ĉar ankaŭ ĉi
tiu ĉe vi estas filo. 18 Dum la elirado de ŝia animo, ĉar
ŝi estis mortanta, ŝi donis al li la nomon Ben-Oni; sed
lia patro donis al li la nomon Benjamen. 19 Kaj Raĥel
mortis, kaj oni enterigis ŝin sur la vojo al Efrata, kiu
estas Bet-Leĥem. 20 Kaj Jakob starigis monumenton
super ŝia tombo. Tio estas la tomba monumento de
Raĥel ĝis la nuna tago. 21 Kaj Izrael formigris, kaj
starigis sian tendon transe de la turo Eder. 22 En la
tempo, kiam Izrael loĝis en tiu lando, Ruben iris kaj
kuŝis kun Bilha, la kromvirino de lia patro. Kaj pri tio
aŭdis Izrael. La filoj de Jakob estis dek du: 23 la filoj
de Lea: Ruben, la unuenaskito de Jakob, kaj Simeon
kaj Levi kaj Jehuda kaj Isaĥar kaj Zebulun; 24 la filoj
de Raĥel: Jozef kaj Benjamen; 25 kaj la filoj de Bilha,
sklavino de Raĥel: Dan kaj Naftali; 26 kaj la filoj de
Zilpa, sklavino de Lea: Gad kaj Aŝer. Tio estas la filoj
de Jakob, kiuj naskiĝis al li en Mezopotamio. 27 Kaj
Jakob venis al sia patro Isaak en Mamre, al Kirjat-
Arba (tio estas Ĥebron), kie vivis fremdule Abraham
kaj Isaak. 28 Isaak havis la aĝon de cent okdek jaroj.
29 Kaj Isaak konsumiĝis kaj mortis kaj alkolektiĝis al

sia popolo, estante maljuna kaj sata de vivo. Kaj lin
enterigis liaj filoj Esav kaj Jakob.

**36** Jen estas la generaciaro de Esav, kiu ankaŭ
estas Edom. 2 Esav prenis siajn edzinojn el la
Kanaanidinoj: Adan, filinon de Elon la Ĥetido, kaj
Oholibaman, filinon de Ana, filino de Cibeon la Ĥivido,
3 kaj Basmaton, filinon de Iŝmael, fratinon de Nebajot.
4 Kaj Ada naskis al Esav Elifazon, kaj Basmat naskis
Reuelon. 5 Kaj Oholibama naskis Jeuŝon kaj Jalamon
kaj Koraĥon. Tio estas la filoj de Esav, kiuj naskiĝis
al li en la lando Kanaana. 6 Kaj Esav prenis siajn
edzinojn kaj siajn filojn kaj siajn filinojn kaj ĉiujn
siajn domanojn kaj sian havon kaj ĉiujn siajn brutojn
kaj sian tutan akiritaĵon, kiun li akiris en la lando
Kanaana; kaj foriris en alian landon, for de sia frato
Jakob. 7 Ĉar ilia havo estis tiel granda, ke ili ne povis
loĝi kune; kaj la lando, en kiu ili vivis fremdule, ne
povis teni ilin pro la grandeco de iliaj brutaroj. 8 Kaj
Esav ekloĝis sur la monto Seir; Esav estas ankaŭ Edom.
9 Kaj jen estas la generaciaro de Esav, la patro de la
Edomidoj, sur la monto Seir: 10 jen estas la nomoj
de la filoj de Esav: Elifaz, filo de Ada, edzino de Esav;
Reuel, filo de Basmat, edzino de Esav. 11 Kaj la filoj de
Elifaz estis: Teman, Omar, Cefo kaj Gatam kaj Kenaz.
12 Kaj Timna estis kromvirino de Elifaz, filo de Esav,
kaj ŝi naskis al Elifaz Amalekon. Tio estas la filoj de
Ada, edzino de Esav. 13 Kaj jen estas la filoj de Reuel:
Naĥat kaj Zeraĥ, Ŝama kaj Miza. Tio estas la filoj de
Basmat, edzino de Esav. 14 Kaj jen estas la filoj de
Oholibama, filino de Ana, filino de Cibeon, edzino de
Esav: ŝi naskis al Esav Jeuŝon kaj Jalamon kaj Koraĥon.
15 Jen estas la ĉefoj de la filoj de Esav: la filoj de Elifaz,
unuenaskito de Esav: ĉefo Teman, ĉefo Omar, ĉefo
Cefo, ĉefo Kenaz, 16 ĉefo Koraĥ, ĉefo Gatam, ĉefo
Amalek. Tio estas la ĉefoj de Elifaz en la lando de
Edom. Tio estas la filoj de Ada. 17 Kaj jen estas la
filoj de Reuel, filo de Esav: ĉefo Naĥat, ĉefo Zeraĥ,
ĉefo Ŝama, ĉefo Miza. Tio estas la ĉefoj de Reuel en la
lando de Edom. Tio estas la filoj de Basmat, edzino de
Esav. 18 Kaj jen estas la filoj de Oholibama, edzino de
Esav: ĉefo Jeuŝ, ĉefo Jalam, ĉefo Koraĥ. Tio estas la
ĉefoj de Oholibama, filino de Ana, edzino de Esav. 19
Tio estas la filoj de Esav, kaj tio estas iliaj ĉefoj. Tio
estas Edom. 20 Jen estas la filoj de Seir la Ĥorido, kiuj
loĝis en la lando: Lotan kaj Ŝobal kaj Cibeon kaj Ana
21 kaj Diŝon kaj Ecer kaj Diŝan. Tio estas la ĉefoj de
la Ĥoridoj, filoj de Seir, en la lando de Edom. 22 La
filoj de Lotan estis: Ĥori kaj Hemam; kaj la fratino de
Lotan estis Timna. 23 Kaj jen estas la filoj de Ŝobal:
Alvan kaj Manaĥat kaj Ebal, Ŝefo kaj Onam. 24 Kaj jen
estas la infanoj de Cibeon: Aja kaj Ana. Tio estas tiu
Ana, kiu trovis la varmajn akvojn en la dezerto, kiam
li paŝtis la azenojn de sia patro Cibeon. 25 Kaj jen
estas la infanoj de Ana: Diŝon, kaj Oholibama, filino
de Ana. 26 Kaj jen estas la filoj de Diŝon: Ĥemdan
kaj Eŝban kaj Jitran kaj Keran. 27 Jen estas la filoj
de Ecer: Bilhan kaj Zaavan kaj Akan. 28 Jen estas la
filoj de Diŝan: Uc kaj Aran. 29 Jen estas la ĉefoj de la
Ĥoridoj: ĉefo Lotan, ĉefo Ŝobal, ĉefo Cibeon, ĉefo Ana,
30 ĉefo Diŝon, ĉefo Ecer, ĉefo Diŝan. Tio estas la ĉefoj
de la Ĥoridoj, laŭ la ordo de ilia ĉefeco en la lando
Seir. 31 Kaj jen estas la reĝoj, kiuj reĝis en la lando
de Edom, antaŭ ol aperis reĝoj ĉe la Izraelidoj: 32 En
Edom reĝis Bela, filo de Beor, kaj la nomo de lia urbo
estis Dinhaba. 33 Kiam Bela mortis, ekreĝis anstataŭ li
Jobab, filo de Zeraĥ el Bocra. 34 Kiam mortis Jobab,
ekreĝis anstataŭ li Ĥuŝam el la lando de la Temananoj.
35 Kiam mortis Ĥuŝam, ekreĝis anstataŭ li Hadad,
filo de Bedad, kiu venkobatis la Midjanidojn sur la
kampo de Moab; kaj la nomo de lia urbo estis Avit.
36 Kiam mortis Hadad, ekreĝis anstataŭ li Samla el
Masreka. 37 Kiam mortis Samla, ekreĝis anstataŭ li
Ŝaul el Reĥobot ĉe la Rivero. 38 Kiam mortis Ŝaul,
ekreĝis anstataŭ li Baal-Ĥanan, filo de Aĥbor. 39 Kiam
mortis Baal-Ĥanan, filo de Aĥbor, ekreĝis anstataŭ li
Hadar; la nomo de lia urbo estis Pau, kaj la nomo de
lia edzino estis Mehetabel, filino de Matred, filino de
Me-Zahab. 40 Kaj jen estas la nomoj de la ĉefoj de
Esav, laŭ iliaj gentoj, lokoj, kaj nomoj: ĉefo Timna,
ĉefo Alva, ĉefo Jetet, 41 ĉefo Oholibama, ĉefo Ela, ĉefo
Pinon, 42 ĉefo Kenaz, ĉefo Teman, ĉefo Mibcar, 43 ĉefo
Magdiel, ĉefo Iram. Tio estas la ĉefoj de Edom, kiel ili
loĝis en la lando, posedata de ili. Esav estis la patro de
la Edomidoj.

**37** Jakob loĝis en la lando, en kiu lia patro loĝis
fremdule, en la lando Kanaana. 2 Jen estas la
generaciaro de Jakob. Jozef, havante la aĝon de dek
sep jaroj, paŝtis kune kun siaj fratoj la brutaron; li
estis knabo kune kun la filoj de Bilha kaj la filoj de
Zilpa, la edzinoj de lia patro; kaj malbonajn famojn
pri ili Jozef raportadis al ilia patro. 3 Kaj Izrael amis
Jozefon pli ol ĉiujn siajn filojn, ĉar li estis por li filo

naskita en maljuneco; kaj li faris al li mikskoloran
veston. 4 Ĉar la fratoj vidis, ke lin ilia patro amas
pli ol ĉiujn liajn fratojn, tial ili malamis lin kaj ne
povis paroli kun li pace. 5 Jozef havis sonĝon, kaj
li rakontis ĝin al siaj fratoj; tiam ili ekmalamis lin
ankoraŭ pli. 6 Li diris al ili: Aŭskultu la sonĝon, kiun
mi sonĝis: 7 ni ligis garbojn meze de la kampo; kaj jen
mia garbo stariĝis kaj restis starante, kaj viaj garboj
ĝin ĉirkaŭis kaj profunde kliniĝis antaŭ mia garbo. 8
Tiam liaj fratoj diris al li: Ĉu vi estos reĝo super ni? aŭ
ĉu vi regos super ni? Kaj ili ankoraŭ pli ekmalamis
lin pro liaj sonĝoj kaj pro liaj vortoj. 9 Kaj li sonĝis
ankoraŭ alian sonĝon kaj rakontis ĝin al siaj fratoj,
kaj diris: Mi sonĝis ankoraŭ unu sonĝon: jen la suno
kaj la luno kaj dek unu steloj kliniĝas antaŭ mi. 10 Kaj
li rakontis al sia patro kaj al siaj fratoj; kaj lia patro
faris al li riproĉon, kaj diris al li: Kion vi volas kun
tiu sonĝo, kiun vi sonĝis? ĉu mi kaj via patrino kaj
viaj fratoj venos, por kliniĝi antaŭ vi ĝis la tero? 11
Kaj liaj fratoj lin enviis, sed lia patro konservis en la
memoro la aferon. 12 Liaj fratoj iris paŝti la ŝafojn
de sia patro en Ŝeĥem. 13 Kaj Izrael diris al Jozef:
Viaj fratoj paŝtas ja en Ŝeĥem; venu do, mi sendos
vin al ili. Kaj tiu respondis al li: Jen mi estas. 14 Kaj
Izrael diris al li: Iru, rigardu, kiel fartas viaj fratoj
kaj kiel fartas la ŝafoj, kaj alportu al mi respondon.
Kaj li forsendis lin el la valo de Ĥebron, kaj tiu venis
Ŝeĥemon. 15 Kaj iu viro trovis lin, kaj vidis, ke li
erarvagas sur la kampo; kaj la viro demandis lin: Kion
vi serĉas? 16 Kaj li diris: Miajn fratojn mi serĉas; diru
al mi, kie ili paŝtas. 17 Kaj la viro diris: Ili foriris de
ĉi tie; ĉar mi aŭdis, ke ili diris: Ni iru al Dotan. Kaj
Jozef iris serĉi siajn fratojn, kaj trovis ilin en Dotan.
18 Kaj ili ekvidis lin de malproksime; kaj antaŭ ol li
alproksimiĝis al ili, naskiĝis en ili la malbona intenco
mortigi lin. 19 Kaj ili diris unu al alia: Jen tiu sonĝisto
venas; 20 nun ni iru kaj mortigu lin, kaj ni ĵetu lin
en unu el la putoj, kaj ni diru, ke sovaĝa besto lin
formanĝis; kaj ni vidos, kio fariĝos el liaj sonĝoj. 21
Sed tion aŭdis Ruben kaj savis lin el iliaj manoj, kaj
diris: Ni ne mortigu lin. 22 Kaj Ruben diris al ili: Ne
verŝu sangon; ĵetu lin en ĉi tiun puton, kiu estas en la
dezerto, sed manon ne metu sur lin. Ĉar li intencis
savi lin el iliaj manoj kaj revenigi lin al sia patro. 23
Kaj kiam Jozef venis al siaj fratoj, ili deprenis de li lian
veston, la mikskoloran veston, kiu estis sur li; 24 kaj
ili prenis lin kaj ĵetis lin en la puton; sed la puto estis
malplena, akvo ne estis en ĝi. 25 Kiam ili sidiĝis, por
manĝi panon, ili levis siajn okulojn, kaj ekvidis, ke
jen karavano da Iŝmaelidoj venas el Gilead, kaj iliaj
kameloj portas aromaĵojn kaj balzamon kaj mirhon; ili
iras, direktante sin al Egiptujo. 26 Kaj Jehuda diris al
siaj fratoj: Kian profiton ni havos, se ni mortigos nian
fraton kaj kaŝos lian sangon? 27 Venu, ni vendos lin al
la Iŝmaelidoj, por ke nia mano ne metiĝu sur lin; ĉar
li estas nia frato, nia karno. Kaj liaj fratoj akceptis lian
proponon. 28 Kaj kiam la Midjanidoj, la komercistoj,
preteriris, ili eltiris kaj levis Jozefon el la puto kaj
vendis Jozefon al la Iŝmaelidoj por dudek arĝentaj
moneroj; kaj tiuj forkondukis Jozefon al Egiptujo. 29
Kiam Ruben revenis al la puto, li vidis, ke Jozef ne
estas en la puto. Kaj li disŝiris siajn vestojn. 30 Kaj li
reiris al siaj fratoj, kaj diris: La knabo forestas, kaj
kien mi nun iros? 31 Kaj ili prenis la veston de Jozef
kaj buĉis kapron kaj trempis la veston en la sango. 32
Kaj ili sendis la mikskoloran veston kaj venigis ĝin al
sia patro, kaj dirigis: Ĉi tion ni trovis; rigardu, ĉu ĝi
estas la vesto de via filo aŭ ne. 33 Kaj li rekonis ĝin,
kaj diris: Ĝi estas la vesto de mia filo! sovaĝa besto lin
formanĝis! disŝirita estas Jozef! 34 Kaj Jakob disŝiris
siajn vestojn kaj metis sakaĵon ĉirkaŭ sian lumbon
kaj funebris pri sia filo multe da tagoj. 35 Kaj ĉiuj
liaj filoj kaj filinoj penis konsoli lin, sed li ne volis
konsoliĝi, kaj diris: En funebro mi iros en Ŝeolon al
mia filo. Tiel ploris pri li lia patro. **(Sheol h7585)** 36 Sed la
Midjanidoj vendis lin en Egiptujo al Potifar, kortegano
de Faraono, estro de la korpogardistoj.

**38** En tiu tempo Jehuda apartiĝis for de siaj fratoj,
kaj ekloĝis apud iu Adulamano, kiu estis nomata
Ĥira. 2 Kaj Jehuda vidis tie filinon de iu Kanaanido,
nomata Ŝua, kaj li prenis ŝin kaj envenis al ŝi. 3 Kaj ŝi
gravediĝis kaj naskis filon; kaj li donis al li la nomon
Er. 4 Kaj ŝi denove gravediĝis kaj naskis filon, kaj ŝi
donis al li la nomon Onan. 5 Kaj ankoraŭ plue ŝi naskis
filon, kaj donis al li la nomon Ŝela. Sed Jehuda estis en
Kezib, kiam ŝi naskis tiun. 6 Kaj Jehuda prenis edzinon
por sia unuenaskito Er, kaj ŝia nomo estis Tamar. 7
Sed Er, la unuenaskito de Jehuda, estis malbona antaŭ
la okuloj de la Eternulo, kaj la Eternulo lin mortigis. 8
Tiam Jehuda diris al Onan: Envenu al la edzino de via
frato, kaj boedziĝu kun ŝi kaj naskigu idaron al via
frato. 9 Sed Onan sciis, ke ne por li estos la idaro; tial,
envenante al la edzino de sia frato, li elverŝadis la

semon sur la teron, por ne doni idaron al sia frato. 10
Kaj malplaĉis al la Eternulo tio, kion li faris, kaj Li
mortigis ankaŭ lin. 11 Tiam Jehuda diris al sia bofilino
Tamar: Restu kiel vidvino en la domo de via patro, ĝis
grandiĝos mia filo Ŝela. Ĉar li timis, ke eble li ankaŭ
mortos, kiel liaj fratoj. Kaj Tamar iris kaj ekloĝis en la
domo de sia patro. 12 Pasis multe da tempo, kaj mortis
la filino de Ŝua, la edzino de Jehuda. Kiam Jehuda
konsoliĝis, li iris Timnan, al la tondantoj de liaj ŝafoj,
li kaj lia amiko, Ĥira la Adulamano. 13 Kaj oni sciigis al
Tamar, dirante: Jen via bopatro iras Timnan, por tondi
siajn ŝafojn. 14 Tiam ŝi demetis de si siajn vestojn
de vidvineco kaj kovris sin per kovrotuko kaj vualis
sin, kaj sidiĝis apud la pordo de Enaim, kiu troviĝas
sur la vojo al Timna. Ĉar ŝi vidis, ke Ŝela grandiĝis
kaj ŝi ne estas donita al li kiel edzino. 15 Kaj Jehuda
ŝin vidis, kaj li pensis, ke ŝi estas publikulino, ĉar ŝi
kovris sian vizaĝon. 16 Kaj li turnis sin al ŝi ĉe la vojo,
kaj diris: Lasu min enveni al vi. Ĉar li ne sciis, ke tio
estas lia bofilino. Kaj ŝi diris: Kion vi donos al mi, se vi
envenos al mi? 17 Kaj li diris: Mi sendos al vi kapron
el la brutaro. Sed ŝi diris: Donu al mi garantiaĵon, ĝis
vi sendos. 18 Kaj li diris: Kian garantiaĵon mi donu
al vi? Ŝi diris: Vian sigelilon kaj vian ŝnureton, kaj
vian bastonon, kiu estas en via mano. Kaj li donis al
ŝi kaj envenis al ŝi, kaj ŝi gravediĝis de li. 19 Kaj ŝi
leviĝis kaj iris, kaj formetis de si sian kovrotukon kaj
surmetis sur sin siajn vestojn de vidvineco. 20 Kaj
Jehuda sendis la kapron per sia amiko la Adulamano,
por preni la garantiaĵon el la manoj de la virino; sed li
ŝin ne trovis. 21 Kaj li demandis la homojn de ŝia loko,
dirante: Kie estas la publikulino, kiu sidis en Enaim
ĉe la vojo? Kaj ili diris: Ĉi tie ne estis publikulino. 22
Kaj li revenis al Jehuda, kaj diris: Mi ŝin ne trovis,
kaj ankaŭ la homoj de la loko diris, ke tie ne estis
publikulino. 23 Tiam Jehuda diris: Ŝi prenu ĝin al si,
por ke ni ne estu mokataj; mi sendis ja ĉi tiun kapron,
sed vi ŝin ne trovis. 24 Post la paso de tri monatoj
oni sciigis al Jehuda, dirante: Tamar, via bofilino,
malĉastiĝis, kaj ŝi eĉ gravediĝis de malĉasteco. Tiam
Jehuda diris: Elkonduku ŝin, kaj oni ŝin brulmortigu.
25 Kiam oni ŝin kondukis, ŝi sendis, ke oni diru al ŝia
bopatro: Mi gravediĝis de la viro, al kiu apartenas ĉi
tio. Kaj ŝi diris: Rekonu, al kiu apartenas la sigelilo kaj
la ŝnuretoj kaj ĉi tiu bastono. 26 Kaj Jehuda rekonis,
kaj li diris: Ŝi estas pli prava ol mi, ĉar mi ne donis ŝin
al mia filo Ŝela. Kaj li ŝin ne plue konis. 27 Kiam ŝi
devis naski, montriĝis, ke ĝemeloj estas en ŝia ventro.
28 Kaj kiam ŝi estis naskanta, elŝoviĝis la mano de
unu infano; kaj la akuŝistino prenis kaj alligis al la
mano ruĝan fadenon, dirante: Ĉi tiu eliris la unua. 29
Sed kiam li retiris sian manon, eliris lia frato. Kaj ŝi
diris: Kial vi faris por vi traŝiron? Kaj oni donis al li la
nomon Perec. 30 Poste eliris lia frato, kiu havis sur sia
mano la ruĝan fadenon. Kaj oni donis al li la nomon
Zeraĥ.

39 Jozef estis forkondukita en Egiptujon, kaj lin
aĉetis Potifar, kortegano de Faraono, estro de la
korpogardistoj, Egipto, el la manoj de la Iŝmaelidoj,
kiuj venigis lin tien. 2 Kaj la Eternulo estis kun Jozef,
kaj li estis sukcesulo; kaj li estis en la domo de sia
sinjoro, la Egipto. 3 Kaj lia sinjoro vidis, ke la Eternulo
estas kun li, kaj ke ĉion, kion li faras, la Eternulo
sukcesigas en lia mano. 4 Kaj Jozef akiris lian favoron
kaj servis lin; kaj li estrigis lin super sia domo, kaj
transdonis en liajn manojn ĉion, kion li havis. 5 Kaj
de tiu tempo, kiam li estrigis lin super sia domo, kaj
super ĉio, kion li havis, la Eternulo benis la domon de
la Egipto pro Jozef, kaj la beno de la Eternulo estis
super ĉio, kion li havis, en la domo kaj sur la kampo. 6
Kaj li lasis ĉion, kion li havis, en la manoj de Jozef, kaj
li sciis pri nenio, krom nur pri la pano, kiun li manĝis.
Kaj Jozef estis gracia kaj bela. 7 Post kelka tempo la
edzino de lia sinjoro ĵetis siajn rigardojn sur Jozefon,
kaj diris: Kuŝiĝu kun mi. 8 Sed li rifuzis, kaj li diris al
la edzino de sia sinjoro: Jen, mia sinjoro kontrolas
ĉe mi nenion en la domo, kaj ĉion, kion li havas, li
transdonis en miajn manojn; 9 neniu en ĉi tiu domo
estas pli granda ol mi, kaj li retenis de mi nenion,
krom vi, ĉar vi estas lia edzino. Kiel do mi faros ĉi tiun
grandan malbonagon kaj pekos antaŭ Dio? 10 Dum ŝi
paroladis al Jozef ĉiutage kaj li ne volis obei ŝin kaj
kuŝiĝi kun ŝi kaj esti kun ŝi, 11 okazis unu tagon, ke li
venis en la domon, por fari sian laboron, kaj neniu el
la domanoj estis en la domo; 12 tiam ŝi kaptis lin je lia
vesto, dirante: Kuŝiĝu kun mi. Sed li lasis sian veston
en ŝiaj manoj kaj forkuris for el la domo. 13 Kaj kiam
ŝi vidis, ke li lasis sian veston en ŝia mano kaj forkuris
el la domo, 14 ŝi vokis siajn domanojn, kaj diris al ili:
Rigardu, li venigis al ni Hebreon, por moki nin; ĉi tiu
venis al mi, por kuŝiĝi kun mi; sed mi ekkriis per laŭta
voĉo; 15 kaj kiam li aŭdis, ke mi ekkriis per laŭta voĉo,
li lasis sian veston ĉe mi kaj forkuris for el la domo.
16 Kaj ŝi kuŝigis lian veston apud si, ĝis lia sinjoro

venis en sian domon. 17 Kaj ŝi rakontis al li tion
saman, dirante: La sklavo, la Hebreo, kiun vi venigis
al ni, venis al mi, por petoli kun mi; 18 sed kiam mi
laŭte ekkriis, li lasis sian veston ĉe mi kaj elkuris el
la domo. 19 Kiam lia sinjoro aŭdis la vortojn de sia
edzino, kiujn ŝi diris al li, parolante: Tiel agis kun mi
via sklavo — tiam li forte ekkoleris. 20 Kaj la sinjoro
de Jozef prenis lin kaj fordonis lin en malliberejon, en
la lokon, kie la malliberuloj de la reĝo estis tenataj;
kaj li estis tie en la malliberejo. 21 Kaj la Eternulo estis
kun Jozef kaj estis favorkora al li kaj havigis al li la
favoron de la estro de la malliberejo. 22 Kaj la estro
de la malliberejo transdonis en la manojn de Jozef
ĉiujn malliberulojn, kiuj estis en la malliberejo; kaj
ĉio, kion ili tie faris, estis farata sub lia kontrolo. 23 La
estro de la malliberejo rigardis nenion, kio estis sub
lia disponado, ĉar la Eternulo estis kun li; kaj ĉion,
kion li faris, la Eternulo sukcesigis.

**40** Post tiuj okazintaĵoj la vinisto de la reĝo de
Egiptujo kaj la bakisto kulpiĝis antaŭ sia sinjoro,
la reĝo de Egiptujo. 2 Kaj Faraono koleriĝis kontraŭ siaj
du korteganoj, kontraŭ la vinistestro kaj kontraŭ la
bakistestro. 3 Kaj li metis ilin sub gardon en la domon
de la estro de la korpogardistoj, en la malliberejon, en
la lokon, kie Jozef estis malliberigita. 4 Kaj la estro de
la korpogardistoj destinis por ili Jozefon, kaj li servis
ilin. Kaj ili restis kelkan tempon en la malliberejo. 5
Kaj ambaŭ sonĝis sonĝon, ĉiu sian apartan sonĝon en
la sama nokto, ĉiu kun aparta signifo de la sonĝo,
la vinisto kaj la bakisto de la reĝo de Egiptujo, kiuj
estis tenataj en la malliberejo. 6 Kiam Jozef venis
al ili matene, li vidis, ke ili estas ĉagrenitaj. 7 Kaj li
demandis la korteganojn de Faraono, kiuj estis kun li
en malliberejo en la domo de lia sinjoro, dirante: Kial
viaj vizaĝoj estas ĉagrenitaj hodiaŭ? 8 Kaj ili diris al
li: Ni sonĝis sonĝon, sed estas ĉi tie neniu, kiu ĝin
signifoklarigus. Kaj Jozef diris al ili: La signifoklarigoj
apartenas ja al Dio; tamen rakontu al mi. 9 Tiam la
vinistestro rakontis sian sonĝon al Jozef, kaj diris al
li: En mia sonĝo mi vidis antaŭ mi vinbertrunkon;
10 la trunko havis tri branĉojn; apenaŭ ĝi ekfloris,
tuj aperis sur ĝi beraroj kun maturaj beroj; 11 kaj la
pokalo de Faraono estis en mia mano; kaj mi prenis la
berojn, kaj mi elpremis ilin en la pokalon de Faraono,
kaj mi donis la pokalon en la manon de Faraono. 12
Kaj Jozef diris al li: Jen estas ĝia signifoklarigo: la tri
branĉoj estas tri tagoj; 13 post tri tagoj Faraono levos
vian kapon kaj redonos al vi vian oficon, kaj vi donos
la pokalon de Faraono en lian manon laŭ la maniero
de antaŭe, kiam vi estis lia vinisto. 14 Sed memoru
min, kiam estos bone al vi, kaj faru al mi favorkoraĵon
kaj memorigu pri mi Faraonon kaj elirigu min el ĉi tiu
domo. 15 Ĉar oni ŝtelis min el la lando de la Hebreoj,
kaj ankaŭ ĉi tie mi faris nenion, pro kio oni metis min
en la malliberejon. 16 Kiam la bakistestro vidis, ke la
signifoklarigo estas bona, li diris al Jozef: Mi ankaŭ
havis sonĝon; jen tri blankaj korboj estis sur mia
kapo; 17 kaj en la supra korbo estis ĉiaspecaj manĝaĵoj
de Faraono, bakitaĵoj, kaj la birdoj manĝis ilin el la
korbo sur mia kapo. 18 Kaj Jozef respondis, dirante:
Jen estas ĝia signifoklarigo: la tri korboj estas tri tagoj;
19 post tri tagoj Faraono deprenos de vi vian kapon
kaj pendigos vin sur arbo, kaj la birdoj formanĝos de
vi vian karnon. 20 En la tria tago, tago de naskiĝo
de Faraono, li faris festenon por ĉiuj siaj servantoj;
kaj li venigis la vinistestron kaj la bakistestron en
la mezon de siaj servantoj. 21 Kaj li redonis al la
vinistestro lian oficon, kaj tiu donis la pokalon en la
manon de Faraono; 22 sed la bakistestron li pendigis,
kiel sonĝoklarigis al ili Jozef. 23 Kaj la vinistestro ne
rememoris Jozefon, sed forgesis lin.

**41** Post du jaroj Faraono havis sonĝon, ke jen li
staras apud la Rivero. 2 Kaj jen el la Rivero eliras
sep bovinoj belaspektaj kaj grasaj, kaj ili paŝtiĝas en
la kanejo. 3 Kaj jen sep aliaj bovinoj eliras post ili el la
Rivero, malbelaspektaj kaj malgrasaj, kaj ili stariĝas
apud tiuj bovinoj sur la bordo de la Rivero. 4 Kaj la
bovinoj malbelaspektaj kaj malgrasaj formanĝis la
sep bovinojn belaspektajn kaj grasajn. Kaj Faraono
vekiĝis. 5 Kaj li endormiĝis kaj denove havis sonĝon:
jen sep spikoj leviĝas sur unu spiktrunko, dikaj kaj
bonaj. 6 Sed jen sep spikoj, maldikaj kaj bruligitaj de
la orienta vento, elkreskas post ili. 7 Kaj la maldikaj
spikoj englutis la sep spikojn dikajn kaj plenajn.
Kaj Faraono vekiĝis, kaj vidis, ke tio estis sonĝo. 8
En la mateno lia spirito afliktiĝis; kaj li sendis kaj
vokigis ĉiujn sorĉistojn de Egiptujo kaj ĉiujn ĝiajn
saĝulojn, kaj Faraono rakontis al ili sian sonĝon; sed
neniu povis signifoklarigi ĝin al Faraono. 9 Tiam
la vinistestro ekparolis al Faraono, dirante: Miajn
pekojn mi rememoras hodiaŭ. 10 Faraono koleris
siajn sklavojn, kaj metis min en malliberejon en

la domon de la estro de la korpogardistoj, min kaj
la bakistestron. 11 Kaj ni sonĝis sonĝon en unu
nokto, mi kaj li; ĉiu havis sonĝon kun aparta signifo.
12 Kaj tie estis kun ni Hebrea junulo, sklavo de la
estro de la korpogardistoj; kaj ni rakontis al li, kaj li
signifoklarigis al ni niajn sonĝojn, al ĉiu li klarigis
laŭ lia sonĝo. 13 Kaj kiel li klarigis al ni, tiel fariĝis:
min oni revenigis al mia ofico, kaj lin oni pendigis. 14
Tiam Faraono sendis alvoki Jozefon; kaj oni rapide
eligis lin el la malliberejo, kaj li sin razis kaj ŝanĝis
siajn vestojn kaj venis al Faraono. 15 Kaj Faraono diris
al Jozef: Mi sonĝis sonĝon, kaj neniu povas ĝin klarigi;
sed pri vi mi aŭdis, ke kiam vi aŭdas sonĝon, vi tuj ĝin
klarigas. 16 Kaj Jozef respondis al Faraono, dirante: Ĝi
ne dependas de mi; Dio respondos bonon al Faraono.
17 Kaj Faraono diris al Jozef: Mi sonĝis, ke jen mi
staras sur la bordo de la Rivero; 18 kaj jen el la Rivero
eliris sep bovinoj grasaj kaj belaspektaj kaj paŝtiĝis
en la kanejo; 19 sed jen sep aliaj bovinoj eliris post
ili, maldikaj, tre malbonaspektaj kaj malgrasaj; tiajn
malbelajn, kiel ili, mi ne vidis en la tuta Egipta lando;
20 kaj la malgrasaj kaj malbelaj bovinoj formanĝis la
sep antaŭajn grasajn bovinojn; 21 kaj tiuj eniĝis en
ilian internon, sed oni ne povis rimarki, ke ili eniĝis
en ilian internon, kaj ilia aspekto estis tiel maldika,
kiel antaŭe. Kaj mi vekiĝis. 22 Kaj mi vidis en sonĝo:
jen sep spikoj elkreskis sur unu spiktrunko, plenaj kaj
bonaj; 23 sed jen sep spikoj, maldikaj, malgrasaj, kaj
bruligitaj de la orienta vento, elkreskis post ili; 24 kaj
la malgrasaj spikoj englutis la sep bonajn spikojn. Kaj
mi rakontis al la sorĉistoj, sed neniu klarigis al mi. 25
Tiam Jozef diris al Faraono: La sonĝo de Faraono estas
unu; kion Dio estas faronta, Li diris al Faraono. 26
La sep bonaj bovinoj estas sep jaroj, kaj la sep bonaj
spikoj estas sep jaroj; ĝi estas unu sonĝo. 27 Kaj la sep
bovinoj malgrasaj kaj malbelaj, kiuj eliris post ili, estas
sep jaroj; kaj la sep spikoj, malplenaj kaj bruligitaj de
la orienta vento, estos sep jaroj de malsato. 28 Tio
estas, pri kio mi diris al Faraono, ke kion Dio estas
faronta, Li montris al Faraono. 29 Jen venos sep jaroj
de granda abundeco en la tuta Egipta lando. 30 Sed
venos sep jaroj de malsato post ili; kaj forgesiĝos
la tuta abundeco en la Egipta lando, kaj la malsato
konsumos la teron. 31 Kaj ne restos postesigno de
la abundeco en la lando, pro tiu malsato, kiu venos
poste, ĉar ĝi estos tre malfacila. 32 Kaj se la sonĝo
dufoje ripetiĝis al Faraono, tio montras, ke la afero
estas firme decidita de Dio, kaj Dio rapidos plenumi
tion. 33 Kaj nun Faraono elserĉu homon kompetentan
kaj saĝan kaj estrigu lin super la Egipta lando; 34
Faraono ordonu, ke li starigu observistojn en la lando
kaj prenadu kvinonon de ĉiuj produktoj de la Egipta
tero dum la sep jaroj de abundeco. 35 Kaj oni kolektu
la tutan manĝaĵon de tiuj venontaj bonaj jaroj, kaj
oni amasigu manĝeblan grenon en la urboj sub la
disponon de Faraono, kaj oni ĝin konservu. 36 Kaj tiu
manĝaĵo estos provizo por la lando por la sep jaroj
de malsato, kiuj estos en la Egipta lando, por ke la
lando ne pereu de malsato. 37 Kaj tio plaĉis al Faraono
kaj al ĉiuj liaj servantoj. 38 Kaj Faraono diris al siaj
servantoj: Ĉu ni povus trovi tian homon, kiel li, en
kiu estas la spirito de Dio? 39 Kaj Faraono diris al
Jozef: Ĉar Dio sciigis al vi ĉion ĉi tion, ne ekzistas
kompetentulo kaj saĝulo tia, kiel vi. 40 Vi estos super
mia domo, kaj viajn vortojn obeos mia tuta popolo;
nur per la trono mi estos pli alta ol vi. 41 Kaj Faraono
diris al Jozef: Vidu, mi estrigis vin super la tuta Egipta
lando. 42 Kaj Faraono deprenis sian ringon de sia
mano kaj metis ĝin sur la manon de Jozef; kaj li vestis
lin per bisinaj vestoj kaj metis oran ĉenon sur lian
kolon. 43 Kaj li veturigis lin sur sia dua ĉaro; kaj oni
kriis antaŭ li: Genuiĝu! Kaj li estrigis lin super la tuta
Egipta lando. 44 Kaj Faraono diris al Jozef: Mi estas
Faraono; sed sen via ordono neniu levos sian manon
aŭ sian piedon en la tuta Egipta lando. 45 Kaj Faraono
donis al Jozef la nomon Cafnat-Paneaĥ, kaj li donis al
li kiel edzinon Asnaton, filinon de Poti-Fera, pastro el
On. Kaj Jozef komencis veturadon tra la Egipta lando.
46 Jozef havis la aĝon de tridek jaroj, kiam li stariĝis
antaŭ Faraono, la reĝo de Egiptujo. Kaj Jozef foriris de
Faraono kaj trapasis la tutan Egiptan landon. 47 Kaj la
tero alportis en la sep jaroj de abundeco grandegajn
amasojn da greno. 48 Kaj li kolektis la tutan grenon de
la sep jaroj, kiuj estis en la Egipta lando, kaj li metis
la grenon en la urbojn; la grenon de ĉiuj kampoj,
kiuj estis ĉirkaŭ iu urbo, li metis en ĝin. 49 Kaj Jozef
kolektis tre multe da greno, kiel la marborda sablo,
ĝis li ĉesis kalkuli, ĉar oni ne plu povis kalkuli. 50
Antaŭ ol venis la jaroj de malsato, al Jozef naskiĝis du
filoj, kiujn naskis al li Asnat, filino de Poti-Fera, pastro
el On. 51 Kaj al la unuenaskito Jozef donis la nomon
Manase, ĉar, li diris, Dio forgesigis al mi ĉiujn miajn
suferojn kaj la tutan domon de mia patro. 52 Kaj al la
dua li donis la nomon Efraim, ĉar, li diris, Dio faris

min fruktoporta en la lando de mia suferado. 53 Kaj
finiĝis la sep jaroj de abundeco, kiuj estis en la Egipta
lando. 54 Kaj komenciĝis la sep jaroj de malsato, kiel
diris Jozef; kaj estis malsato en ĉiuj landoj, sed en la
tuta lando Egipta estis pano. 55 Kiam la tuta Egipta
lando eksuferis malsaton, la popolo kriis al Faraono
pri pano; tiam Faraono diris al ĉiuj Egiptoj: Iru al
Jozef, kaj kion li diros al vi, tion faru. 56 La malsato
estis en la tuta lando. Jozef malfermis ĉiujn grenejojn,
kaj vendadis al la Egiptoj. Kaj la malsato estis tre
granda en la Egipta lando. 57 Kaj el ĉiuj landoj oni
venadis Egiptujon, por aĉeti de Jozef, ĉar la malsato
estis tre granda en ĉiuj landoj.

42 Kiam Jakob sciiĝis, ke oni vendas grenon en
Egiptujo, li diris al siaj filoj: Kion vi rigardas? 2
Kaj li diris: Mi aŭdis, ke oni vendas grenon en Egiptujo;
veturu do tien kaj aĉetu por ni tie grenon, por ke ni
vivu kaj ne mortu. 3 Kaj forveturis dek fratoj de Jozef,
por aĉeti grenon en Egiptujo. 4 Sed Benjamenon, la
fraton de Jozef, Jakob ne sendis kun liaj fratoj; ĉar
li timis, ke eble lin trafos malfeliĉo. 5 Kaj la filoj de
Izrael venis, por aĉeti grenon, kune kun aliaj venintoj;
ĉar estis malsato en la lando Kanaana. 6 Kaj Jozef
estis la estro super la lando, kaj li estis la vendanto
de la greno por la tuta popolo de la lando. Kaj la
fratoj de Jozef venis kaj kliniĝis al li vizaĝaltere. 7
Kiam Jozef ekvidis siajn fratojn, li rekonis ilin; sed li
ŝajnigis sin fremda al ili kaj parolis kun ili malafable,
kaj diris al ili: El kie vi venis? Kaj ili diris: El la lando
Kanaana, por aĉeti manĝaĵon. 8 Jozef rekonis siajn
fratojn, sed ili lin ne rekonis. 9 Kaj Jozef rememoris
la sonĝojn, kiujn li sonĝis pri ili. Kaj li diris al ili: Vi
estas spionoj: vi venis, por vidi la malfortajn lokojn
de la lando. 10 Kaj ili diris al li: Ne, mia sinjoro! viaj
sklavoj venis, por aĉeti manĝaĵon. 11 Ni ĉiuj estas filoj
de unu homo; ni estas honestaj; viaj sklavoj neniam
estis spionoj. 12 Sed li diris al ili: Ne, vi venis, por vidi
la malfortajn lokojn de la lando. 13 Ili diris: Ni, viaj
sklavoj, estas dek du fratoj, filoj de unu homo en la
lando Kanaana; la plej juna estas nun kun nia patro,
kaj unu malaperis. 14 Kaj Jozef diris al ili: Estas tio,
kion mi diris al vi, vi estas spionoj. 15 Per tio mi vin
elprovos: mi ĵuras per la vivo de Faraono, ke vi foriros
el ĉi tie nur tiam, kiam venos ĉi tien via plej juna frato.
16 Sendu unu el vi, ke li alkonduku vian fraton; sed vi
estos malliberigitaj, kaj oni esploros viajn vortojn, ĉu
vi diris la veron; se ne, tiam mi ĵuras per la vivo de
Faraono, ke vi estas spionoj. 17 Kaj li metis ilin sub
gardon por la daŭro de tri tagoj. 18 Kaj Jozef diris al ili
en la tria tago: Tion faru, kaj vi restos vivaj, ĉar mi
havas timon antaŭ Dio. 19 Se vi estas homoj honestaj,
tiam unu el viaj fratoj restu malliberigita en la domo,
en kiu oni vin gardas, kaj vi iru kaj forportu hejmen
la grenon, kiun vi aĉetis kontraŭ la malsato. 20 Sed
vian plej junan fraton venigu al mi, por ke pruviĝu
la vereco de viaj vortoj kaj por ke vi ne mortu. Kaj
ili faris tiel. 21 Kaj ili diris unu al alia: Vere ni estas
kulpaj pro nia frato; ĉar ni vidis la suferadon de lia
animo, kiam li petegis nin, sed ni ne aŭskultis; por tio
venis sur nin ĉi tiu sufero. 22 Kaj Ruben respondis al
ili, dirante: Mi diris ja al vi: Ne peku rilate la infanon;
sed vi ne obeis; nun lia sango estas repostulata. 23
Kaj ili ne sciis, ke Jozef komprenas; ĉar inter ili estis
tradukanto. 24 Kaj li deturnis sin de ili kaj ekploris;
poste li denove returnis sin al ili kaj parolis kun ili,
kaj li prenis el inter ili Simeonon kaj ligis lin antaŭ
iliaj okuloj. 25 Kaj Jozef ordonis plenigi iliajn sakojn
per greno kaj redoni ilian monon al ĉiu en lian sakon
kaj doni al ili manĝaĵon por la vojo. Tiel oni faris al
ili. 26 Kaj ili metis sian grenon sur siajn azenojn kaj
foriris. 27 Kaj unu el ili malfermis sian sakon, por doni
furaĝon al sia azeno dum la nokta halto, kaj li ekvidis
sian monon, kiu estis en la aperturo de lia sako. 28
Kaj li diris al siaj fratoj: Mia mono estas redonita; jen
ĝi estas en mia sako. Tiam konsterniĝis iliaj koroj,
kaj kun tremo ili diris unuj al la aliaj: Kial Dio faris
tion al ni? 29 Kiam ili venis al sia patro Jakob en la
landon Kanaanan, ili rakontis al li ĉion, kio okazis al
ili, dirante: 30 La homo, kiu estas sinjoro super tiu
lando, parolis kun ni malafable, kaj diris, ke ni estas
spionoj en la lando. 31 Kaj ni diris al li: Ni estas homoj
honestaj, ni neniam estis spionoj; 32 ni estas dek du
fratoj, filoj de nia patro; unu malaperis, kaj la plej
juna estas nun kun nia patro en la lando Kanaana.
33 Tiam diris al ni la homo, kiu estas sinjoro super
la lando: Per tio mi konvinkiĝos, ke vi estas homoj
honestaj: unu el viaj fratoj lasu ĉe mi, kaj la necesan
grenon por via hejmo prenu kaj iru; 34 kaj venigu
al mi vian plej junan fraton; tiam mi scios, ke vi ne
estas spionoj, ke vi estas honestaj homoj; vian fraton
mi redonos al vi, kaj vi povos negoci en la lando. 35
Kiam ili malplenigis siajn sakojn, montriĝis, ke ĉiu el
ili havas sian ligaĵon da mono en sia sako. Kaj ili vidis

siajn ligaĵojn da mono, ili kaj ilia patro, kaj ili timiĝis.
**36** Kaj ilia patro Jakob diris al ili: Vi min seninfanigis;
Jozef forestas, kaj Simeon forestas, kaj Benjamenon vi
volas forpreni! sur min ĉio falis! **37** Tiam Ruben diris
al sia patro jene: Miajn du filojn mortigu, se mi ne
revenigos lin al vi; donu lin en mian manon, kaj mi
revenigos lin al vi. **38** Sed li diris: Mia filo ne iros kun
vi; ĉar lia frato mortis, kaj li sola restis. Se lin trafos
malfeliĉo sur la vojo, kiun vi iros, tiam vi enirigos
miajn grizajn harojn kun malĝojo en Ŝeolon. **(Sheol
h7585)**

**43** La malsato estis tre premanta en la lando. **2**
Kiam ili formanĝis la grenon, kiun ili venigis el
Egiptujo, ilia patro diris al ili: Iru denove kaj aĉetu
por ni iom da pano. **3** Tiam Jehuda diris al li jene: Tiu
homo tre severe diris al ni: Ne aperu antaŭ mi, se
via frato ne estos kun vi. **4** Se vi sendos nian fraton
kun ni, tiam ni iros kaj aĉetos por vi panon; **5** sed se
vi ne sendos, tiam ni ne iros; ĉar tiu homo diris al
ni: Ne aperu antaŭ mi, se via frato ne estos kun vi. **6**
Kaj Izrael diris: Kial vi faris al mi tian malbonon, kaj
diris al la homo, ke vi havas ankoraŭ fraton? **7** Kaj
ili diris: La homo severe demandis pri ni kaj pri nia
familio, dirante: Ĉu via patro ankoraŭ vivas? ĉu vi
havas fraton? Kaj ni respondis al li tiujn demandojn.
Ĉu ni povis scii, ke li diros: Venigu vian fraton? **8**
Kaj Jehuda diris al sia patro Izrael: Sendu la knabon
kun mi, tiam ni leviĝos kaj iros, por ke ni vivu kaj ne
mortu, ni kaj vi kaj niaj infanoj. **9** Mi garantios por li,
el miaj manoj vi lin postulos. Se mi ne revenigos lin al
vi kaj ne starigos antaŭ via vizaĝo, tiam mi estos kulpa
antaŭ vi dum la tuta vivo. **10** Se ni ne prokrastus,
ni jam du fojojn estus revenintaj. **11** Tiam diris al ili
ilia patro Izrael: Se estas tiel, tiam faru jene: prenu
el la plej bonaj fruktoj de la lando en viajn vazojn,
kaj alportu al la homo donacon: iom da balzamo kaj
iom da mielo, aromaĵon kaj mirhon, pistakojn kaj
migdalojn. **12** Kaj da mono prenu duoblan sumon en
viajn manojn, kaj la monon, kiu estis metita returne
en la aperturojn de viaj sakoj, redonu per viaj manoj:
eble okazis eraro. **13** Kaj vian fraton prenu, kaj leviĝu
kaj iru returne al tiu homo. **14** Kaj Dio la Plejpotenca
akirigu al vi kompaton de tiu homo, ke li resendu
kun vi vian alian fraton kaj Benjamenon; sed mi, se
mi seninfaniĝis, mi restu seninfana. **15** Kaj la homoj
prenis tiujn donacojn, kaj da mono ili prenis duoblan
sumon en siajn manojn, kaj ankaŭ Benjamenon; kaj ili
leviĝis kaj iris Egiptujon kaj stariĝis antaŭ Jozef. **16**
Kiam Jozef vidis kun ili Benjamenon, li diris al la estro
de sia domo: Enkonduku tiujn homojn en la domon,
kaj buĉu bruton kaj pretigu; ĉar kun mi manĝos tiuj
homoj hodiaŭ tagmeze. **17** Kaj la homo faris, kiel diris
Jozef, kaj la homo enkondukis tiujn homojn en la
domon de Jozef. **18** Kaj tiuj homoj ektimis, kiam oni
enkondukis ilin en la domon de Jozef, kaj ili diris: Pro
la mono, kiu antaŭe estis metita returne en niajn
sakojn, oni enkondukis nin, por ĵeti sur nin kalumnion
kaj ataki nin, kaj preni nin kiel sklavojn kune kun niaj
azenoj. **19** Kaj ili aliris al la homo, kiu estis estro super
la domo de Jozef, kaj ekparolis al li ĉe la pordo de la
domo. **20** Kaj ili diris: Pardonu, nia sinjoro! ni estis
venintaj, por aĉeti panon; **21** sed kiam ni venis al la
noktohaltejo kaj ni malfermis niajn sakojn, ni ekvidis,
ke la mono de ĉiu el ni estas en la aperturo de lia sako,
nia mono laŭ ĝia plena pezo; tial ni ĝin realportis per
niaj manoj. **22** Kaj alian monon ni alportis per niaj
manoj, por aĉeti panon. Ni ne scias, kiu metis nian
monon en niajn sakojn. **23** Kaj li diris: Estu trankvilaj,
ne timu. Via Dio kaj la Dio de via patro donis al vi
trezoron en viajn sakojn; vian monon mi ricevis.
Kaj li elkondukis al ili Simeonon. **24** Kaj tiu homo
enkondukis ilin en la domon de Jozef kaj donis akvon,
kaj ili lavis siajn piedojn; kaj li donis manĝon al iliaj
azenoj. **25** Kaj ili pretigis la donacojn por la veno de
Jozef tagmeze; ĉar ili aŭdis, ke tie ili manĝos panon.
**26** Kaj Jozef venis hejmen; kaj ili alportis al li en la
domon la donacojn, kiujn ili havis en la manoj, kaj
kliniĝis al li ĝis la tero. **27** Kaj li demandis ilin pri ilia
farto, kaj diris: Ĉu bone fartas via maljuna patro, pri
kiu vi diris al mi? ĉu li vivas ankoraŭ? **28** Kaj ili diris:
Via sklavo nia patro fartas bone; li vivas ankoraŭ. Kaj
ili kliniĝis kaj ĵetis sin antaŭ li sur la teron. **29** Kaj li
levis siajn okulojn, kaj ekvidis sian fraton Benjamen,
la filon de lia patrino, kaj li diris: Ĉu tio estas via plej
juna frato, pri kiu vi diris al mi? Kaj li diris: Dio vin
favoru, mia filo. **30** Kaj Jozef forrapidis, ĉar ekflamis
lia interno pro lia frato kaj li volis plori. Kaj li eniris
en internan ĉambron kaj ploris tie. **31** Sed li lavis
sian vizaĝon kaj eliris, kaj tenis sin forte, kaj diris:
Surtabligu panon! **32** Kaj oni surtabligis por li aparte,
kaj por ili aparte, kaj por la Egiptoj, kiuj manĝis kun
li, aparte; ĉar la Egiptoj ne povas manĝi panon kun
Hebreoj: tio estas abomenindaĵo por ili. **33** Kaj ili

sidiĝis antaŭ li, pli maljuna laŭ sia maljuneco kaj pli
juna laŭ sia juneco; kaj la homoj miris unu antaŭ alia.
34 Kaj oni portis al ili manĝaĵon de lia tablo; sed la
porcio de Benjamen estis kvinoble pli granda, ol la
porcioj de ĉiuj. Kaj ili trinkis kaj ebriiĝis kun li.

**44** Kaj Jozef ordonis al la estro de sia domo jene:
Plenigu la sakojn de tiuj homoj per greno tiom,
kiom ili nur povas porti, kaj metu la monon de ĉiu
en la aperturon de lia sako; 2 kaj mian pokalon, la
arĝentan pokalon, metu en la aperturon de la sako de
la plej juna, kune kun la mono por lia greno. Kaj tiu
faris, kiel Jozef diris. 3 Kiam eklumis la mateno, oni
forsendis la homojn, ilin kaj iliajn azenojn. 4 Kiam ili
eliris el la urbo kaj ankoraŭ ne estis malproksime,
Jozef diris al la estro de sia domo: Leviĝu, kuru post
tiuj homoj, kaj kiam vi atingos ilin, diru al ili: Kial vi
pagis malbonon por bono? 5 Ĝi estas ja tiu pokalo, el
kiu trinkas mia sinjoro, kaj li ankaŭ aŭguras sur ĝi!
vi agis malbone! 6 Kaj li kuratingis ilin kaj diris al
ili tiujn vortojn. 7 Kaj ili diris al li: Kial mia sinjoro
parolas tiajn vortojn? Dio gardu viajn sklavojn de
farado de tia afero! 8 Jen la monon, kiun ni trovis en
la aperturoj de niaj sakoj, ni realportis al vi el la lando
Kanaana; kiel do ni ŝtelus el la domo de via sinjoro
arĝenton aŭ oron? 9 Tiu el viaj sklavoj, ĉe kiu oni
ĝin trovos, mortu, kaj ankaŭ ni fariĝu sklavoj al mia
sinjoro. 10 Kaj li diris: Ĝi estu laŭ viaj vortoj: tiu, ĉe
kiu ĝi troviĝos, estu mia sklavo, sed vi estos senkulpaj.
11 Kaj rapide ĉiu el ili mallevis sian sakon sur la teron,
kaj ĉiu malfermis sian sakon. 12 Kaj li serĉis; de la plej
maljuna li komencis, kaj per la plej juna li finis. Kaj la
pokalo troviĝis en la sako de Benjamen. 13 Tiam ili
disŝiris siajn vestojn, kaj ĉiu metis la ŝarĝon sur sian
azenon, kaj ili reiris en la urbon. 14 Kaj Jehuda kaj liaj
fratoj venis en la domon de Jozef, kiu estis ankoraŭ
tie, kaj ili ĵetis sin antaŭ li sur la teron. 15 Kaj Jozef
diris al ili: Kian aferon vi faris! ĉu vi ne scias, ke tia
homo, kiel mi, facile divenos? 16 Tiam Jehuda diris:
Kion ni diru al mia sinjoro? kion ni parolu kaj per kio
ni nin pravigu? Dio trovis la pekon de viaj sklavoj! jen
ni estas sklavoj al mia sinjoro, ni kaj ankaŭ tiu, en
kies manoj troviĝis la pokalo. 17 Sed li diris: Dio min
gardu de tia faro! la homo, en kies mano troviĝis la
pokalo, estos sklavo al mi, sed vi iru en paco al via
patro. 18 Tiam Jehuda aliris al li, kaj diris: Permesu,
mia sinjoro, ke via sklavo diru vorton en la orelojn de
mia sinjoro, kaj ne koleriĝu kontraŭ via sklavo, ĉar
vi estas kiel Faraono. 19 Mia sinjoro demandis siajn
sklavojn, dirante: Ĉu vi havas patron aŭ fraton? 20
Kaj ni diris al mia sinjoro: Ni havas maljunan patron,
kaj malgrandan knabon, naskitan en lia maljuneco;
kaj lia frato mortis, kaj li restis sola de sia patrino,
kaj lia patro lin amas. 21 Tiam vi diris al viaj sklavoj:
Venigu lin al mi, ke mi lin rigardu. 22 Sed ni diris al
mia sinjoro: La knabo ne povas forlasi sian patron; ĉar
se li forlasos sian patron, tiu mortos. 23 Tiam vi diris
al viaj sklavoj: Se ne venos kun vi via plej juna frato,
tiam ne aperu plu antaŭ mia vizaĝo. 24 Kaj kiam ni
venis al via sklavo nia patro, ni diris al li la vortojn
de mia sinjoro. 25 Nia patro diris: Reiru, aĉetu por
ni iom da greno. 26 Sed ni diris: Ni ne povas iri; se
estos kun ni nia plej juna frato, tiam ni iros; ĉar ni
ne povas aperi antaŭ la vizaĝo de tiu homo, se nia
plej juna frato ne estos kun ni. 27 Tiam via sklavo
nia patro diris al ni: Vi scias, ke mia edzino naskis
al mi du; 28 sed unu foriris de mi, kaj mi diris: Li
estas disŝirita; kaj mi ne vidis lin ĝis nun; 29 se vi
ankaŭ ĉi tiun prenos de mi kaj lin trafos malfeliĉo,
tiam vi enirigos miajn grizajn harojn kun malĝojo en
Ŝeolon. (Sheol h7585) 30 Kaj nun se mi venos al via sklavo
mia patro kaj ne estos kun ni la knabo, al kies animo
estas alligita lia animo, 31 tiam, ekvidinte, ke la knabo
forestas, li mortos; kaj viaj sklavoj enirigos la grizajn
harojn de via sklavo nia patro kun malĝojo en Ŝeolon.
(Sheol h7585) 32 Ĉar mi, via sklavo, garantiis por la knabo
antaŭ mia patro, dirante: Se mi ne revenigos lin al vi,
mi estos kulpa antaŭ mia patro por ĉiam. 33 Tial mi,
via sklavo, restu anstataŭ la knabo kiel sklavo ĉe mia
sinjoro, sed la knabo iru kun siaj fratoj. 34 Ĉar kiel mi
iros al mia patro, se la knabo ne estos kun mi? mi
tiam vidus la malfeliĉon, kiu trafos mian patron.

**45** Tiam Jozef ne povis plu sin deteni antaŭ ĉiuj,
kiuj staris ĉirkaŭ li, kaj li ekkriis: Elirigu ĉiujn for
de mi. Kaj neniu restis ĉe li, kiam Jozef rekonigis sin al
siaj fratoj. 2 Kaj li laŭte ekploris, kaj aŭdis la Egiptoj,
kaj aŭdis la domo de Faraono. 3 Kaj Jozef diris al siaj
fratoj: Mi estas Jozef; ĉu mia patro vivas ankoraŭ? Sed
liaj fratoj ne povis respondi al li, ĉar ili konfuziĝis
antaŭ li. 4 Kaj Jozef diris al siaj fratoj: Aliru do al mi.
Kaj ili aliris. Kaj li diris: Mi estas Jozef, via frato, kiun
vi vendis en Egiptujon. 5 Sed nun ne afliktiĝu, kaj
ne bedaŭru, ke vi vendis min ĉi tien; ĉar por la savo

de via vivo Dio sendis min antaŭ vi. 6 Ĉar nun jam
du jarojn daŭras la malsato en la lando, sed ankoraŭ
dum kvin jaroj ne estos plugado nek rikoltado. 7 Kaj
Dio sendis min antaŭ vi, por vin restigi sur la tero
kaj por konservi vian vivon per granda savo. 8 Sciu
do, ne vi sendis min ĉi tien, sed Dio; kaj Li faris min
patro al Faraono, kaj sinjoro super lia tuta domo, kaj
reganto super la tuta Egipta lando. 9 Iru rapide al
mia patro, kaj diru al li: Tiele diris via filo Jozef: Dio
faris min sinjoro super la tuta Egiptujo; venu al mi, ne
prokrastu. 10 Vi loĝos en la lando Goŝen, kaj vi estos
proksime de mi, vi kaj viaj filoj kaj la filoj de viaj filoj,
kaj viaj ŝafoj kaj viaj bovoj, kaj ĉio, kion vi havas. 11
Kaj mi nutros vin tie, ĉar ankoraŭ kvin jarojn daŭros
la malsato; por ke ne mizeriĝu vi kaj via domo, kaj
ĉio, kion vi havas. 12 Kaj jen viaj okuloj nun vidas,
kaj ankaŭ la okuloj de mia frato Benjamen, ke mia
buŝo parolas al vi. 13 Kaj rakontu al mia patro pri
mia tuta gloro en Egiptujo, kaj ĉion, kion vi vidis;
kaj rapide venigu mian patron ĉi tien. 14 Kaj li ĵetis
sin sur la kolon de sia frato Benjamen kaj ploris, kaj
Benjamen ploris sur lia kolo. 15 Kaj li kisis ĉiujn siajn
fratojn kaj ploris super ili. Poste liaj fratoj ekparolis
kun li. 16 Kaj la famo venis en la domon de Faraono,
ke venis la fratoj de Jozef. Kaj tio plaĉis al Faraono kaj
al liaj servantoj. 17 Kaj Faraono diris al Jozef: Diru
al viaj fratoj: Faru tion, ŝarĝu viajn brutojn kaj iru
en la landon Kanaanan; 18 kaj prenu vian patron kaj
viajn familiojn, kaj venu al mi; mi donos al vi ĉion
bonan en la Egipta lando, kaj vi manĝos la grasaĵon
de la lando. 19 Kaj ordonu al ili jene: Prenu al vi el la
Egipta lando veturilojn por viaj infanoj kaj virinoj, kaj
kunprenu vian patron kaj venu. 20 Kaj ne tro zorgu
pri viaj aĵoj; ĉar ĉio bona en la Egipta lando estas
al via dispono. 21 Kaj la filoj de Izrael faris tiel. Kaj
Jozef donis al ili veturilojn laŭ la ordono de Faraono,
kaj li donis al ili provizojn por la vojo. 22 Al ĉiuj li
donis novajn vestojn, sed al Benjamen li donis tricent
arĝentajn monerojn kaj kvin novajn vestojn. 23 Kaj
por sia patro li sendis dek azenojn, ŝarĝitajn per
bonaĵo el Egiptujo, kaj dek azeninojn, ŝarĝitajn per
greno, pano, kaj manĝaĵo por lia patro por la vojo. 24
Kaj li forsendis siajn fratojn, kaj ili iris. Kaj li diris al
ili: Ne malpacu dum la vojo. 25 Kaj ili eliris el Egiptujo
kaj venis en la landon Kanaanan al sia patro Jakob. 26
Kaj ili sciigis al li, dirante: Jozef vivas ankoraŭ, kaj
li regas nun super la tuta Egipta lando. Kaj lia koro
konfuziĝis, ĉar li ne kredis al ili. 27 Kaj ili rediris al li
ĉiujn vortojn de Jozef, kiujn li diris al ili; kaj li vidis la
veturilojn, kiujn Jozef sendis, por veturigi lin, kaj tiam
la spirito de ilia patro Jakob reviviĝis. 28 Kaj Izrael
diris: Sufiĉas, ke mia filo Jozef ankoraŭ vivas: mi iros
kaj vidos lin, antaŭ ol mi mortos.

**46** Izrael ekiris kun ĉio, kion li havis, kaj li venis
en Beer-Ŝeban, kaj li alportis oferojn al la Dio
de sia patro Isaak. 2 Kaj Dio diris al Izrael en nokta
vizio: Jakob! Jakob! Kaj tiu diris: Jen mi estas. 3 Kaj Li
diris: Mi estas Dio, la Dio de via patro. Ne timu iri
Egiptujon, ĉar Mi tie faros vin granda popolo. 4 Mi
iros kun vi Egiptujon, kaj Mi ankaŭ revenigos vin; kaj
Jozef metos sian manon sur viajn okulojn. 5 Kaj Jakob
leviĝis el Beer-Ŝeba; kaj la filoj de Izrael ekveturigis
sian patron Jakob kaj siajn infanojn kaj siajn edzinojn
sur la veturiloj, kiujn sendis Faraono, por alveturigi
lin. 6 Kaj ili prenis siajn brutojn, kaj sian havon, kiun
ili akiris en la lando Kanaana, kaj venis Egiptujon,
Jakob kaj lia tuta idaro kun li. 7 Siajn filojn kaj nepojn,
siajn filinojn kaj nepinojn, kaj sian tutan idaron li
venigis kun si en Egiptujon. 8 Jen estas la nomoj de
la filoj de Izrael, kiuj venis Egiptujon: Jakob kaj liaj
filoj. La unuenaskito de Jabob, Ruben. 9 Kaj la filoj de
Ruben: Ĥanoĥ kaj Palu kaj Ĥecron kaj Karmi. 10 Kaj la
filoj de Simeon: Jemuel kaj Jamin kaj Ohad kaj Jaĥin
kaj Coĥar, kaj Ŝaul, filo de Kanaanidino. 11 Kaj la filoj
de Levi: Gerŝon, Kehat, kaj Merari. 12 Kaj la filoj de
Jehuda: Er kaj Onan kaj Ŝela kaj Perec kaj Zeraĥ; sed
Er kaj Onan mortis en la lando Kanaana. Kaj la filoj de
Perec estis: Ĥecron kaj Ĥamul. 13 Kaj la filoj de Isaĥar:
Tola kaj Puva kaj Job kaj Ŝimron. 14 Kaj la filoj de
Zebulun: Sered kaj Elon kaj Jaĥleel. 15 Tio estas la filoj
de Lea, kiujn ŝi naskis al Jakob en Mezopotamio, kaj
lia filino Dina. La nombro de ĉiuj animoj de liaj filoj
kaj filinoj estis tridek tri. 16 Kaj la filoj de Gad: Cifjon
kaj Ĥagi, Ŝuni kaj Ecbon, Eri kaj Arod kaj Areli. 17
Kaj la filoj de Aŝer: Jimna kaj Jiŝva kaj Jiŝvi kaj Beria,
kaj Seraĥ, ilia fratino; kaj la filoj de Beria: Ĥeber kaj
Malkiel. 18 Tio estas la filoj de Zilpa, kiun Laban donis
al sia filino Lea; kaj ŝi naskis ilin al Jakob, dek ses
animojn. 19 La filoj de Raĥel, edzino de Jakob: Jozef kaj
Benjamen. 20 Kaj al Jozef en la lando Egipta naskiĝis
Manase kaj Efraim, kiujn naskis al li Asnat, filino de
Poti-Fera, pastro el On. 21 Kaj la filoj de Benjamen:
Bela kaj Beĥer kaj Aŝbel, Gera kaj Naaman, Eĥi kaj

Roŝ, Mupim kaj Ĥupim kaj Ard. 22 Tio estas la filoj de
Raĥel, kiuj naskiĝis al Jakob, kune dek kvar animoj. 23
Kaj la filoj de Dan: Ĥuŝim. 24 Kaj la filoj de Naftali:
Jaĥceel kaj Guni kaj Jecer kaj Ŝilem. 25 Tio estas la
filoj de Bilha, kiun donis Laban al sia filino Raĥel; ŝi
naskis ilin al Jakob, kune sep animojn. 26 La nombro
de ĉiuj animoj, kiuj venis kun Jakob en Egiptujon, kiuj
eliris el lia lumbo, krom la edzinoj de la filoj de Jakob,
estis sesdek ses. 27 Kaj la filoj de Jozef, kiuj naskiĝis
al li en Egiptujo, estis du animoj. La nombro de ĉiuj
animoj de la domo de Jakob, kiuj venis Egiptujon,
estis sepdek. 28 Jehudan li sendis antaŭ si al Jozef,
por ke li informu lin antaŭe pri Goŝen. Kaj ili venis
en la landon Goŝen. 29 Kaj Jozef jungis sian ĉaron
kaj veturis renkonte al sia patro Izrael en la landon
Goŝen. Kaj kiam li ekvidis lin, li ĵetis sin sur lian kolon
kaj longe ploris sur lia kolo. 30 Kaj Izrael diris al Jozef:
Nun mi volonte mortos, vidinte vian vizaĝon, ĉar vi
vivas ankoraŭ. 31 Kaj Jozef diris al siaj fratoj kaj al la
domo de sia patro: Mi iros kaj rakontos al Faraono,
kaj diros al li: Miaj fratoj kaj la domo de mia patro,
kiuj estis en la lando Kanaana, venis al mi; 32 kaj
tiuj homoj estas paŝtistoj, ĉar ili estas brutedukistoj;
kaj siajn malgrandajn kaj grandajn brutojn, kaj ĉion,
kion ili havas, ili kunportis. 33 Kaj se Faraono vin
alvokos, kaj diros: Kio estas via okupo? 34 tiam diru:
Viaj sklavoj estis brutedukistoj de nia juneco ĝis nun,
kiel ni, tiel ankaŭ niaj patroj; por ke vi enloĝiĝu en la
lando Goŝen; ĉar ĉiu paŝtisto estas abomenindaĵo por
la Egiptoj.

**47** Jozef venis kaj sciigis al Faraono, kaj diris: Mia
patro kaj miaj fratoj kaj iliaj malgrandaj kaj
grandaj brutoj, kaj ĉio, kio apartenas al ili, venis el la
lando Kanaana, kaj nun ili estas en la lando Goŝen.
2 Kaj el inter siaj fratoj li prenis kvin homojn kaj
starigis ilin antaŭ Faraono. 3 Kaj Faraono diris al liaj
fratoj: Kio estas via okupo? Kaj ili diris al Faraono:
Viaj sklavoj estas brutedukistoj, kiel ni, tiel ankaŭ
niaj patroj. 4 Kaj ili diris al Faraono: Ni venis, por loĝi
en la lando; ĉar ne ekzistas paŝtaĵo por la brutoj de
viaj sklavoj, ĉar forta estas la malsato en la lando
Kanaana; permesu do, ke viaj sklavoj loĝu en la lando
Goŝen. 5 Tiam Faraono diris al Jozef jene: Via patro
kaj viaj fratoj venis al vi; 6 la lando Egipta estas antaŭ
vi; en la plej bona loko de la lando loĝigu vian patron
kaj viajn fratojn; ili loĝu en la lando Goŝen; kaj se
vi scias, ke estas inter ili kapablaj homoj, faru ilin
administrantoj de miaj brutoj. 7 Kaj Jozef enkondukis
sian patron Jakob kaj starigis lin antaŭ Faraono; kaj
Jakob benis Faraonon. 8 Faraono diris al Jakob: Kian
aĝon vi havas? 9 Kaj Jakob diris al Faraono: La nombro
de la jaroj de mia migrado estas cent tridek jaroj;
malmultaj kaj malbonaj estis la jaroj de mia vivo,
kaj ili ne atingis la nombron de la jaroj de la vivo
de miaj patroj dum ilia migrado. 10 Kaj Jakob benis
Faraonon kaj foriris de Faraono. 11 Kaj Jozef enloĝigis
sian patron kaj siajn fratojn, kaj donis al ili posedaĵon
en la Egipta lando, en la lando Rameses, kiel Faraono
ordonis. 12 Kaj Jozef havigis panon al sia patro kaj
al siaj fratoj kaj al la tuta domo de sia patro, laŭ la
nombro de la infanoj. 13 Ne estis pano sur la tuta
tero, ĉar la malsato estis tre forta; kaj senfortiĝis de la
malsato la lando Egipta kaj la lando Kanaana. 14 Kaj
Jozef kolektis la tutan monon, kiu troviĝis en la lando
Egipta kaj en la lando Kanaana, pro la greno, kiun
oni aĉetadis; kaj Jozef enportis la tutan monon en
la domon de Faraono. 15 Kiam ne estis plu mono en
la lando Egipta kaj en la lando Kanaana, ĉiuj Egiptoj
venis al Jozef, kaj diris: Donu al ni panon; kial ni
mortu antaŭ vi pro tio, ke ni jam ne havas monon? 16
Tiam Jozef diris: Donu viajn brutojn; kaj mi donos al
vi panon pro viaj brutoj, se vi jam ne havas monon. 17
Kaj ili alkondukis siajn brutojn al Jozef; kaj Jozef donis
al ili panon pro ĉevaloj, ŝafoj, bovoj, kaj azenoj, kaj li
provizadis al ili panon pro ĉiuj iliaj brutoj en tiu jaro.
18 Kiam finiĝis tiu jaro, ili venis al li en la dua jaro, kaj
diris al li: Ni ne kaŝos antaŭ nia sinjoro, ke monon
ni jam ne havas, kaj la brutoj estas ĉe nia sinjoro;
nenio restis antaŭ nia sinjoro krom niaj korpoj kaj nia
tero; 19 kial ni pereu antaŭ viaj okuloj, ni kaj nia tero?
aĉetu nin kaj nian teron pro la pano, kaj ni kaj nia
tero estu sklavoj al Faraono; kaj donu semon, por ke
ni vivu kaj ne mortu kaj la tero ne dezertiĝu. 20 Kaj
Jozef aĉetis la tutan Egiptan teron por Faraono; ĉar la
Egiptoj vendis ĉiu sian kampon, ĉar forte premis ilin
la malsato. Kaj la tero fariĝis propraĵo de Faraono. 21
Kaj la popolon li transirigis en la urbojn, de unu fino
de Egiptujo ĝis la alia. 22 Nur la teron de la pastroj
li ne aĉetis; ĉar la pastroj havis parton, difinitan de
Faraono, kaj ili manĝadis sian parton, kiun donis al
ili Faraono, tial ili ne vendis sian teron. 23 Kaj Jozef
diris al la popolo: Jen mi aĉetis vin hodiaŭ kaj vian
teron por Faraono; jen mi donas al vi semon, kaj

prisemu la teron. **24** Kaj kiam vi havos rikolton, vi
donos kvinonon al Faraono, kaj kvar partoj apartenos
al vi, por prisemi la kampon kaj por manĝi, por vi, por
ĉio, kio estas en viaj domoj, kaj por viaj infanoj. **25** Kaj
ili diris: Vi konservis nian vivon; ni akiru favoron de
nia sinjoro, kaj ni estu sklavoj al Faraono. **26** Kaj Jozef
faris ĝin leĝo ĝis la hodiaŭa tago: de la tero Egipta
kvinono de la produktoj apartenas al Faraono. Nur
la tero de la pastroj ne fariĝis propraĵo de Faraono.
**27** Kaj Izrael ekloĝis en la lando Egipta, en la lando
Goŝen; kaj ili posedis ĝin kaj fruktis kaj multiĝis forte.
**28** Kaj Jakob vivis en la lando Egipta dek sep jarojn.
Kaj la daŭro de la vivo de Jakob estis cent kvardek
sep jaroj. **29** Kiam alproksimiĝis la tempo, kiam Izrael
devis morti, li alvokis sian filon Jozef, kaj diris al li: Se
mi akiris vian favoron, metu vian manon sub mian
femuron kaj faru al mi favorkoraĵon kaj fidelaĵon, ne
enterigu min en Egiptujo; **30** sed mi kuŝu kun miaj
patroj; elportu min el Egiptujo kaj entombigu min en
ilia tombujo. Kaj tiu diris: Mi faros, kiel vi diris. **31** Kaj
li diris: Ĵuru al mi. Kaj tiu ĵuris. Kaj Izrael adorkliniĝis
sur la kapa parto de la lito.

**48** Post tiuj okazintaĵoj oni sciigis al Jozef: Jen, via
patro estas malsana. Kaj li prenis kun si siajn du
filojn, Manase kaj Efraim. **2** Kaj oni sciigis al Jakob,
dirante: Jen via filo Jozef venas al vi. Tiam Izrael
streĉis siajn fortojn kaj sidiĝis sur la lito. **3** Kaj Jakob
diris al Jozef: Dio la Plejpotenca aperis al mi en Luz, en
la lando Kanaana, kaj benis min. **4** Kaj Li diris al mi:
Mi fruktigos vin kaj multigos vin kaj faros vin amaso
da popoloj, kaj Mi donos ĉi tiun landon al via idaro
post vi kiel eternan posedaĵon. **5** Kaj nun viaj du filoj,
kiuj naskiĝis al vi en la lando Egipta antaŭ mia alveno
al vi en Egiptujon, estas miaj; Efraim kaj Manase estu
al mi, kiel Ruben kaj Simeon. **6** Sed viaj infanoj, kiuj
naskiĝos al vi post ili, estu viaj; per la nomo de siaj
fratoj ili estos nomataj en sia hereda parto. **7** Kiam
mi venis el Mezopotamio, mortis ĉe mi Raĥel en la
lando Kanaana, dum la vojo, kiam restis ankoraŭ iom
da tero ĝis Efrata; kaj mi enterigis ŝin tie sur la vojo
al Efrata, kiu estas nomata ankaŭ Bet-Leĥem. **8** Kaj
Izrael ekvidis la filojn de Jozef, kaj diris: Kiuj estas ĉi
tiuj? **9** Kaj Jozef diris al sia patro: Ili estas miaj filoj,
kiujn donis al mi Dio ĉi tie. Kaj tiu diris: Alkonduku
ilin al mi, kaj mi benos ilin. **10** La okuloj de Izrael
malfortiĝis de maljuneco, li ne povis bone vidi. Jozef
alkondukis ilin al li, kaj li kisis ilin kaj ĉirkaŭprenis
ilin. **11** Kaj Izrael diris al Jozef: Vidi vian vizaĝon mi
ne esperis, kaj jen Dio vidigis al mi eĉ vian idaron. **12**
Kaj Jozef forigis ilin de liaj genuoj, kaj kliniĝis antaŭ li
vizaĝaltere. **13** Kaj Jozef prenis ambaŭ, Efraimon per
sia dekstra mano, kontraŭ la maldekstra de Izrael,
kaj Manasen per sia maldekstra mano, kontraŭ la
dekstra de Izrael, kaj alkondukis ilin al li. **14** Sed Izrael
etendis sian dekstran manon kaj metis ĝin sur la
kapon de Efraim, kvankam li estis la pli juna, kaj sian
maldekstran sur la kapon de Manase; li intence tiel
faris per siaj manoj, ĉar Manase estis la unuenaskito.
**15** Kaj li benis Jozefon, kaj diris: Dio, antaŭ kiu iradis
miaj patroj Abraham kaj Isaak, Dio, kiu paŝtis min de
mia naskiĝo ĝis la nuna tago, **16** la anĝelo, kiu savis
min de ĉia malbono — Li benu la knabojn; oni nomu
ilin per mia nomo kaj per la nomo de miaj patroj
Abraham kaj Isaak, kaj ili kresku kaj multiĝu sur la
tero. **17** Jozef vidis, ke lia patro metis sian dekstran
manon sur la kapon de Efraim, kaj tio ne plaĉis al
li; kaj li prenis la manon de sia patro, por deturni
ĝin de la kapo de Efraim sur la kapon de Manase. **18**
Kaj Jozef diris al sia patro: Ne tiel, mia patro, ĉar ĉi
tiu estas la unuenaskito; metu vian dekstran manon
sur lian kapon. **19** Sed lia patro rifuzis, kaj diris: Mi
scias, mia filo, mi scias; li ankaŭ fariĝos popolo kaj li
ankaŭ fariĝos granda, sed lia pli juna frato estos pli
granda ol li, kaj lia idaro estos multenombra inter la
popoloj. **20** Kaj li benis ilin en tiu tago, dirante: Per vi
benados Izrael, dirante: Dio vin faru kiel Efraim kaj
Manase. Kaj li metis Efraimon antaŭ Manase. **21** Kaj
Izrael diris al Jozef: Jen mi mortas; kaj Dio estos kun
vi kaj revenigos vin en la landon de viaj patroj. **22** Kaj
mi donas al vi unu pecon da lando preferece antaŭ
viaj fratoj, kiun mi prenis el la manoj de la Amoridoj
per mia glavo kaj pafarko.

**49** Kaj Jakob alvokis siajn filojn, kaj diris: Kolektiĝu,
kaj mi sciigos al vi, kio fariĝos al vi en la tempo
venonta. **2** Kunvenu kaj aŭskultu, filoj de Jakob, Kaj
aŭskultu Izraelon, vian patron. **3** Ruben, vi estas mia
unuenaskito, Mia forto kaj komenco de mia vireco,
Supro de digno kaj supro de potenco; **4** Rapidema kiel
akvo, vi ne staros plej alte, Ĉar vi supreniris sur la
liton de via patro; Tiam vi malhonoris mian liton per
la supreniro. **5** Simeon kaj Levi, fratoj; Iloj kruelaj
estas viaj glavoj, **6** En ilian konsilon mia animo ne

iru, Al ilia kunveno ne aliĝu mia honoro; Ĉar en sia
kolero ili mortigis viron Kaj pro sia kaprico ili kripligis
bovon. **7** Malbenita estu ilia kolero, ĉar ĝi estas forta,
Kaj ilia furiozo, ĉar ĝi estas kruela. Mi dividos ilin
en Jakob, Kaj mi disĵetos ilin en Izrael. **8** Jehuda, vin
laŭdos viaj fratoj; Via mano estas sur la nuko de viaj
malamikoj; Kliniĝos antaŭ vi la filoj de via patro.
**9** Juna leono estas Jehuda; De ĉasakiro, mia filo, vi
leviĝis. Li genuiĝis, kuŝiĝis kiel leono kaj kiel leonino;
Kiu lin levos? **10** Ne forpreniĝos sceptro de Jehuda, Nek
regbastono de inter liaj piedoj, Ĝis venos paco Kaj al li
humiliĝos la popoloj. **11** Li alligas al la vinbertrunko
sian azenidon Kaj al la delikata vinberbranĉo la filon
de sia azenino; Li lavas en vino sian veston Kaj en
sango de vinberoj sian mantelon. **12** Liaj okuloj estas
ruĝaj de vino Kaj la dentoj blankaj de lakto. **13** Zebulun
loĝos ĉe la bordo de maro, Ĉe albordiĝejo de ŝipoj,
Kaj lia limo atingos Cidonon. **14** Isaĥar estas fortosta
azeno; Li kuŝos inter la baraĵoj. **15** Kaj li vidis, ke
ripozo estas bona Kaj la tero estas agrabla; Kaj li
klinis sian ŝultron por portado Kaj fariĝis laboristo
por tributo. **16** Dan juĝos sian popolon, Kiel unu el
la triboj de Izrael. **17** Dan estos serpento ĉe la vojo,
Cerasto ĉe la irejo, Mordanto de kalkano de ĉevalo,
Ke ĝia rajdanto falas malantaŭen. **18** Vian helpon
mi esperas, ho Eternulo. **19** Gadon premos amaso,
Sed li repremos ĝin je la kalkano. **20** Ĉe Aŝer estas
grasa lia pano, Kaj li liverados frandaĵojn al reĝoj. **21**
Naftali estas belkura cervo; Li donas belajn parolojn.
**22** Fruktoporta arbo estas Jozef, Fruktoporta arbo
super fonto; La branĉoj etendiĝis super la muron. **23**
Ĉagrenis lin pafistoj Kaj pafis kaj malamikis kontraŭ
li; **24** Sed forta restis lia pafarko Kaj elastaj estas liaj
brakoj, Per la manoj de la Potenculo de Jakob, Per
la Paŝtisto, la Roko de Izrael. **25** La Dio de via patro
donos al vi helpon, La Plejpotenculo benos vin Per
benoj de la ĉielo supre, Per benoj de la abismo, kiu
kuŝas malsupre, Per benoj de la mamoj kaj de la utero.
**26** La benoj de via patro estas pli fortaj, Ol la benoj de
miaj gepatroj, Ĝis la limo de la eternaj altaĵoj. Ili estu
sur la kapo de Jozef Kaj sur la verto de la elektito inter
liaj fratoj. **27** Benjamen estas lupo karnoŝira; Matene
li manĝos ĉasakiron, Kaj vespere li dividos rabaĵon.
**28** Tio estas ĉiuj dek du triboj de Izrael; kaj tio estas,
kion diris al ili ilia patro; kaj li benis ilin, ĉiun per
aparta beno li benis. **29** Kaj li ordonis al ili, kaj diris al
ili: Mi alkolektiĝas al mia popolo; enterigu min apud
miaj patroj en la kaverno, kiu troviĝas sur la kampo
de Efron la Ĥetido, **30** en la duobla kampa kaverno,
kiu troviĝas antaŭ Mamre en la lando Kanaana kaj
kiun Abraham aĉetis kune kun la kampo de Efron la
Ĥetido kiel tomban posedaĵon. **31** Tie oni enterigis
Abrahamon kaj lian edzinon Sara, tie oni enterigis
Isaakon kaj lian edzinon Rebeka, kaj tie mi enterigis
Lean, **32** sur la kampo kaj en la kaverno sur ĝi, kiuj
estas aĉetitaj de el la filoj de Ĥet. **33** Kaj Jakob finis la
ordonadon al siaj filoj, kaj li kunigis siajn piedojn sur
la lito, kaj mortis kaj alkolektiĝis al sia popolo.

**50** Tiam Jozef ĵetis sin sur la vizaĝon de sia patro,
kaj ploris super li kaj kisis lin. **2** Kaj Jozef ordonis
al siaj servantoj kuracistoj, balzami lian patron; kaj
la kuracistoj balzamis Izraelon. **3** Kaj pasis super
li kvardek tagoj; ĉar tiel longe daŭras la tagoj de
balzamado. Kaj la Egiptoj ploris pri li sepdek tagojn. **4**
Kiam pasis la tagoj de lia priplorado, Jozef ekparolis
al la domanoj de Faraono, dirante: Se mi akiris vian
favoron, diru al Faraono jene: **5** Mia patro ĵurigis min,
dirante: Jen mi mortas; en mia tombo, kiun mi elfosis
al mi en la lando Kanaana, tie vi min enterigu. Nun
mi volus iri, enterigi mian patron, kaj reveni. **6** Kaj
Faraono diris: Iru kaj enterigu vian patron, kiel li
ĵurigis vin. **7** Kaj Jozef iris, por enterigi sian patron;
kaj kun li iris ĉiuj servantoj de Faraono, la ĉefoj de
lia domo kaj ĉiuj ĉefoj de la lando Egipta, **8** kaj la
tuta domo de Jozef, kaj liaj fratoj kaj la domo de lia
patro; nur siajn infanojn kaj siajn malgrandajn kaj
grandajn brutojn ili restigis en la lando Goŝen. **9** Kun
ili iris ankaŭ ĉaroj kaj rajdantoj; kaj la anaro estis tre
granda. **10** Ili venis al la placo Atad, kiu estas transe de
Jordan, kaj ili faris tie grandan kaj fortan priploradon;
kaj li funebris pri sia patro dum sep tagoj. **11** Kiam la
loĝantoj de la lando Kanaana vidis la funebron sur
la placo Atad, ili diris: Ĝi estas granda funebro ĉe la
Egiptoj; tial la loko ricevis la nomon Abel-Micraim. Ĝi
estas transe de Jordan. **12** Kaj liaj infanoj faris kun li,
kiel li ordonis al ili. **13** Kaj liaj filoj forportis lin en
la landon Kanaanan, kaj enterigis lin en la kampa
duobla kaverno, kiun Abraham aĉetis kune kun la
kampo kiel tomban posedaĵon de el Efron la Ĥetido,
antaŭ Mamre. **14** Kaj Jozef revenis Egiptujon, li kaj
liaj fratoj, kaj ĉiuj, kiuj iris kun li, por enterigi lian
patron, post kiam ili enterigis lian patron. **15** Kiam
la fratoj de Jozef vidis, ke ilia patro mortis, ili diris:

Eble Jozef ekmalamos nin, kaj repagos al ni pro la
tuta malbono, kiun ni faris al li? **16** Tial ili sendis al
Jozef, por diri al li: Via patro ordonis antaŭ sia morto
jene: **17** Tiel diru al Jozef: Mi petas vin, pardonu la
kulpon de viaj fratoj kaj ilian pekon, ĉar ili faris al vi
malbonon. Nun pardonu do la kulpon de la sklavoj de
la Dio de via patro. Kaj Jozef ploris, kiam ili parolis al
li. **18** Kaj iris liaj fratoj mem kaj ĵetis sin teren antaŭ li,
kaj diris: Jen ni estas sklavoj al vi. **19** Sed Jozef diris
al ili: Ne timu; ĉar ĉu mi estas anstataŭ Dio? **20** Vi
intencis fari al mi malbonon; sed Dio aranĝis de tio
bonon, por fari tiel, kiel nun estas, por konservi la
vivon de multe da homoj. **21** Kaj nun ne timu; mi
nutros vin kaj viajn infanojn. Kaj li konsolis ilin kaj
parolis al ili kore. **22** Kaj Jozef loĝis en Egiptujo, li kaj
la domo de lia patro; kaj Jozef vivis cent dek jarojn. **23**
Kaj Jozef vidis ĉe Efraim infanojn ĝis la tria generacio;
ankaŭ la infanoj de Maĥir, filo de Manase, naskiĝis sur
la genuoj de Jozef. **24** Kaj Jozef diris al siaj fratoj: Mi
mortas, sed Dio rememoros vin, kaj elkondukos vin el
ĉi tiu lando en la landon, pri kiu Li ĵuris al Abraham,
Isaak, kaj Jakob. **25** Kaj Jozef ĵurigis la filojn de Izrael,
dirante: Kiam Dio rememoros vin, tiam elportu miajn
ostojn el ĉi tie. **26** Kaj Jozef mortis en la aĝo de cent
dek jaroj; kaj oni balzamis lin kaj metis lin en ĉerkon
en Egiptujo.

# Eliro

**1** Jen estas la nomoj de la filoj de Izrael, kiuj venis
Egiptujon kun Jakob; ĉiu venis kun siaj domanoj: **2**
Ruben, Simeon, Levi, kaj Jehuda; **3** Isaĥar, Zebulun,
kaj Benjamen; **4** Dan kaj Naftali, Gad kaj Aŝer. **5** Kaj la
nombro de ĉiuj animoj, kiuj eliris el la lumbo de Jakob,
estis sepdek; kaj Jozef estis jam en Egiptujo. **6** Kaj
mortis Jozef kaj ĉiuj liaj fratoj kaj tiu tuta generacio. **7**
Kaj la Izraelidoj fruktis kaj diskreskis kaj multiĝis kaj
treege fortiĝis, kaj la lando pleniĝis de ili. **8** Aperis
en Egiptujo nova reĝo, kiu ne konis Jozefon. **9** Kaj
li diris al sia popolo: Jen la popolo de la Izraelidoj
estas pli multenombra kaj pli forta ol ni; **10** ni uzu
do ruzon kontraŭ ĝi, por ke ĝi ne multiĝu, ĉar se
okazos milito, tiam ankaŭ tiu popolo aliĝos al niaj
malamikoj kaj militos kontraŭ ni kaj foriros el la
lando. **11** Kaj oni metis super ilin laborestrojn, por
premi ilin per malfacilaj laboroj. Kaj ili konstruis por
Faraono provizejajn urbojn Pitom kaj Rameses. **12** Sed
ju pli oni premis ilin, des pli ili multiĝis kaj kreskis; kaj
la Izraelidoj fariĝis teruraĵo. **13** Kaj la Egiptoj laborigis
la Izraelidojn kruele. **14** Kaj ili maldolĉigis al ili la
vivon per malfacila laboro super argilo kaj brikoj, kaj
per ĉia laboro sur la kampo, per ĉiaj laboroj, kiujn
ili kruele metis sur ilin. **15** Kaj la reĝo de Egiptujo
parolis al la Hebreaj akuŝistinoj, el kiuj unu estis
nomata Ŝifra kaj la dua estis nomata Pua. **16** Li diris:
Kiam vi akuŝigos la Hebreinojn, rigardu la kuŝejon;
se estas filo, mortigu lin, kaj se estas filino, lasu ŝin
vivi. **17** Sed la akuŝistinoj timis Dion, kaj ili ne faris,
kiel diris al ili la reĝo de Egiptujo; kaj ili lasis la vivon
al la virseksaj infanoj. **18** Kaj la reĝo de Egiptujo
alvokis la akuŝistinojn, kaj diris al ili: Kial vi tion faras
kaj lasas la vivon al la virseksaj infanoj? **19** Tiam la
akuŝistinoj diris al Faraono: Ne kiel la Egiptaj virinoj
estas la Hebreinoj; ili estas viglaj: antaŭ ol venas al
ili la akuŝistino, ili jam estas naskintaj. **20** Kaj Dio
faris bonon al la akuŝistinoj, kaj la popolo multiĝis
kaj tre fortiĝis. **21** Kaj ĉar la akuŝistinoj timis Dion, Li
konstruis al ili domojn. **22** Kaj Faraono ordonis al sia
tuta popolo, dirante: Ĉiun filon, kiu naskiĝis, ĵetu en
la Riveron, kaj ĉiun filinon lasu viva.

**2** Kaj iris unu homo el la domo de Levi kaj prenis
edzinon Leviidinon. **2** Kaj la virino gravediĝis, kaj
naskis filon; kaj ŝi vidis, ke li estas bela, kaj ŝi kaŝis lin
dum tri monatoj. **3** Sed ŝi ne povis plu kaŝi lin, tial ŝi
prenis por li keston el kanoj kaj ĉirkaŭŝmiris ĝin per
asfalto kaj peĉo, kaj metis tien la infanon kaj metis
ĝin inter la kanojn sur la bordo de la Rivero. **4** Kaj lia
fratino stariĝis malproksime, por sciiĝi, kio fariĝos
kun li. **5** Kaj la filino de Faraono malsupreniris, por
lavi sin en la Rivero, kaj ŝiaj servantinoj iradis sur la
bordo de la Rivero. Ŝi ekvidis la keston meze de la
kanoj, kaj ŝi sendis sian sklavinon, ke ŝi ĝin prenu. **6**
Ŝi malfermis, kaj ekvidis la infanon; ĝi estis knabeto,
kiu ploris. Kaj ŝi kompatis lin, kaj diris: Ĝi estas el la
Hebreaj infanoj. **7** Tiam lia fratino diris al la filino de
Faraono: Ĉu mi iru kaj voku al vi virinon nutrantinon
el la Hebreinoj, ke ŝi nutru por vi la infanon? **8** Kaj la
filino de Faraono diris al ŝi: Iru. Kaj la knabino iris
kaj vokis la patrinon de la infano. **9** Kaj la filino de
Faraono diris al ŝi: Prenu ĉi tiun infanon kaj nutru
ĝin por mi, kaj mi pagos al vi. Kaj la virino prenis la
infanon kaj nutris ĝin. **10** Kiam la infano grandiĝis, ŝi
alportis lin al la filino de Faraono, kaj li fariĝis filo
por ŝi, kaj ŝi donis al li la nomon Moseo, dirante: El
la akvo mi lin eltiris. **11** En la tempo, kiam Moseo
estis jam granda, li eliris al siaj fratoj kaj vidis iliajn
malfacilajn laborojn; kaj li vidis, ke Egipto batas iun
Hebreon el liaj fratoj. **12** Tiam li turnis sin unuflanken
kaj aliflanken, kaj vidinte, ke estas neniu, mortigis la
Egipton kaj kaŝis lin en la sablo. **13** Kaj li eliris en la
sekvanta tago, kaj vidis, ke du Hebreoj malpacas. Kaj li
diris al la ofendanto: Kial vi batas vian proksimulon?
**14** Kaj tiu diris: Kiu faris vin estro kaj juĝanto super
ni? ĉu vi intencas mortigi min, kiel vi mortigis la
Egipton? Tiam Moseo ektimis, kaj diris: Videble la
afero fariĝis sciata. **15** Kaj Faraono aŭdis pri tiu afero
kaj deziris mortigi Moseon. Sed Moseo forkuris de
Faraono kaj ekloĝis en la lando Midjana, kaj li loĝis
apud puto. **16** La pastro Midjana havis sep filinojn. Kaj
ili venis kaj ĉerpis akvon kaj plenigis la trogojn, por
trinkigi la ŝafojn de sia patro. **17** Sed venis la paŝtistoj
kaj forpelis ilin. Tiam Moseo leviĝis kaj helpis ilin kaj
trinkigis iliajn ŝafojn. **18** Kiam ili venis al sia patro
Reuel, li diris: Kial vi tiel baldaŭ venis hodiaŭ? **19** Kaj
ili diris: Iu Egipto savis nin el la manoj de la paŝtistoj,
kaj li eĉ ĉerpis por ni kaj trinkigis la ŝafojn. **20** Tiam li
diris al siaj filinoj: Kie do li estas? kial vi forlasis tiun
homon? voku lin, ke li manĝu panon. **21** Kaj Moseo
konsentis loĝi ĉe tiu homo; kaj tiu donis sian filinon
Cipora al Moseo. **22** Kaj ŝi naskis filon, kaj li donis al

li la nomon Gerŝom, ĉar li diris: Fremdulo mi estis
en lando fremda. 23 Post longa tempo mortis la reĝo
de Egiptujo. Kaj la Izraelidoj ĝemis pro la laboroj kaj
kriis, kaj ilia kriado pro la laboroj venis supren al Dio.
24 Kaj Dio aŭdis ilian ĝemadon, kaj Dio rememoris
Sian interligon kun Abraham, Isaak, kaj Jakob. 25 Kaj
Dio rigardis la Izraelidojn, kaj Dio rememoris ilin.

3 Moseo paŝtis la ŝafojn de Jitro, sia bopatro,
pastro Midjana. Kaj li forkondukis la ŝafojn en
malproksiman parton de la dezerto kaj venis al la Dia
monto Ĥoreb. 2 Kaj aperis al li anĝelo de la Eternulo
en flama fajro el la mezo de arbetaĵo. Kaj li vidis,
ke jen la arbetaĵo brulas en la fajro, kaj tamen la
arbetaĵo ne forbrulas. 3 Kaj Moseo diris: Mi iros kaj
rigardos tiun grandan fenomenon, kial la arbetaĵo ne
forbrulas. 4 La Eternulo vidis, ke li iras, por rigardi,
kaj Dio vokis al li el la mezo de la arbetaĵo, kaj diris:
Moseo, Moseo! Kaj tiu diris: Jen mi estas. 5 Kaj Li
diris: Ne alproksimiĝu ĉi tien; deprenu viajn ŝuojn
de viaj piedoj, ĉar la loko, sur kiu vi staras, estas
tero sankta. 6 Ankoraŭ Li diris: Mi estas la Dio de
via patro, la Dio de Abraham, la Dio de Isaak, kaj la
Dio de Jakob. Kaj Moseo kovris sian vizaĝon, ĉar li
timis rigardi Dion. 7 Kaj la Eternulo diris: Mi vidis la
mizeron de Mia popolo, kiu estas en Egiptujo, kaj Mi
aŭdis ĝian kriadon kaŭze de ĝiaj premantoj; Mi scias
ĝiajn suferojn. 8 Kaj Mi malsupreniris, por savi ĝin el
la manoj de la Egiptoj kaj elirigi ĝin el tiu lando en
landon bonan kaj vastan, en landon, en kiu fluas lakto
kaj mielo, sur la lokon de la Kanaanidoj kaj la Ĥetidoj
kaj la Amoridoj kaj la Perizidoj kaj la Ĥividoj kaj la
Jebusidoj. 9 Nun la krioj de la Izraelidoj venis al Mi; kaj
Mi vidis la turmentojn, per kiuj la Egiptoj turmentas
ilin. 10 Iru do, Mi sendos vin al Faraono, kaj elkonduku
Mian popolon la Izraelidojn el Egiptujo. 11 Kaj Moseo
diris al Dio: Kiu mi estas, ke mi iru al Faraono kaj mi
elkonduku la Izraelidojn el Egiptujo? 12 Kaj Li diris: Mi
estos kun vi; kaj tio estu por vi signo, ke Mi vin sendis:
kiam vi estos elkondukinta Mian popolon el Egiptujo,
vi faros servon al Dio sur ĉi tiu monto. 13 Kaj Moseo
diris al Dio: Jen mi venos al la Izraelidoj, kaj diros al
ili: La Dio de viaj patroj sendis min al vi; tiam ili diros
al mi: Kia estas Lia nomo? Kion mi diru al ili? 14 Kaj
Dio diris al Moseo: MI ESTAS, KIU ESTAS. Kaj Li diris:
Tiel diru al la Izraelidoj: La Estanto sendis min al vi.
15 Kaj plue Dio diris al Moseo: Tiel diru al la Izraelidoj:
La Eternulo, la Dio de viaj patroj, la Dio de Abraham,
la Dio de Isaak, kaj la Dio de Jakob, sendis min al vi.
Tia estas Mia nomo por eterne, kaj tia estas memoraĵo
pri Mi por ĉiuj generacioj. 16 Iru, kaj kunvenigu la
ĉefojn de Izrael, kaj diru al ili: La Eternulo, la Dio de
viaj patroj, aperis al mi, la Dio de Abraham, Isaak, kaj
Jakob, kaj Li diris: Mi atentis vin, kaj tion, kio estas
farita al vi en Egiptujo. 17 Kaj Mi diris: Mi elirigos vin
el la mizero de Egiptujo en la landon de la Kanaanidoj
kaj la Ĥetidoj kaj la Amoridoj kaj la Perizidoj kaj la
Ĥividoj kaj la Jebusidoj, en landon, en kiu fluas lakto
kaj mielo. 18 Kaj ili aŭskultos vian voĉon, kaj vi venos,
vi kaj la ĉefoj de Izrael, al la reĝo de Egiptujo, kaj vi
diros al li: La Eternulo, la Dio de la Hebreoj, vokis nin;
lasu do nin iri vojon de tri tagoj en la dezerton, por
ke ni faru oferon al la Eternulo, nia Dio. 19 Sed Mi
scias, ke la reĝo de Egiptujo ne permesos al vi iri, se
ne devigos lin forta mano. 20 Kaj Mi etendos Mian
manon, kaj Mi batos Egiptujon per ĉiuj Miaj mirakloj,
kiujn Mi faros meze de ĝi; kaj poste li lasos vin iri. 21
Kaj Mi donos al tiu popolo favoron de la Egiptoj; kaj
kiam vi iros, vi ne iros kun malplenaj manoj. 22 Ĉiu
virino petos de sia najbarino kaj de sia samdomanino
vazojn arĝentajn kaj vazojn orajn kaj vestojn; kaj vi
metos tion sur viajn filojn kaj sur viajn filinojn, kaj vi
senhavigos la Egiptojn.

4 Moseo respondis kaj diris: Sed se ili ne kredos al
mi kaj ne aŭskultos mian voĉon, kaj se ili diros: Ne
aperis al vi la Eternulo? 2 Kaj la Eternulo diris al li:
Kion vi tie havas en via mano? Kaj li diris: Bastonon.
3 Kaj Li diris: Ĵetu ĝin sur la teron. Kaj li ĵetis ĝin sur la
teron, kaj ĝi fariĝis serpento; kaj Moseo forkuris de ĝi.
4 Sed la Eternulo diris al Moseo: Etendu vian manon,
kaj kaptu ĝin je ĝia vosto (kaj li etendis sian manon
kaj kaptis ĝin, kaj ĝi fariĝis bastono en lia mano), 5
por ke ili kredu, ke aperis al vi la Eternulo, la Dio de
iliaj patroj, la Dio de Abraham, la Dio de Isaak, kaj la
Dio de Jakob. 6 Kaj la Eternulo diris al li plue: Metu
vian manon en vian sinon. Kaj li metis sian manon en
sian sinon; kaj kiam li elprenis ĝin, jen lia mano estis
leprokovrita kvazaŭ neĝo. 7 Kaj Li diris: Remetu vian
manon en vian sinon (kaj li remetis sian manon en
sian sinon; kaj kiam li elprenis ĝin el sia sino, jen ĝi
denove fariĝis kiel lia karno); 8 kaj se ili ne kredos al vi
kaj ne aŭskultos la voĉon de la unua signo, ili kredos
al la voĉo de la alia signo. 9 Kaj se ili ne kredos eĉ al

ambaŭ tiuj signoj kaj ne aŭskultos vian voĉon, tiam
prenu akvon el la Rivero kaj verŝu ĝin sur la sekan
teron; kaj tiam la akvo, kiun vi prenis el la Rivero,
fariĝos sango sur la seka tero. **10** Kaj Moseo diris al
la Eternulo: Ho, mia Sinjoro, mi ne estas elokventa,
nek de hieraŭ, nek de antaŭhieraŭ, nek de tiu tempo,
kiam Vi komencis paroli al Via sklavo; ĉar mi havas
nelertan buŝon kaj nelertan langon. **11** Kaj la Eternulo
diris al li: Kiu faris buŝon al la homo? aŭ kiu faras
muta aŭ surda aŭ vidanta aŭ blinda? ĉu ne Mi, la
Eternulo? **12** Kaj nun iru, kaj Mi estos kun via buŝo,
kaj Mi instruos vin, kion vi devas paroli. **13** Kaj li diris:
Ho, mia Sinjoro, sendu iun alian. **14** Tiam ekflamis la
kolero de la Eternulo kontraŭ Moseo, kaj Li diris: Mi
scias ja, ke via frato Aaron, la Levido, estas elokventa;
kaj jen li eĉ iras al vi renkonte, kaj kiam li vidos vin, li
ekĝojos en sia koro. **15** Kaj vi parolos al li kaj metos
la vortojn en lian buŝon; kaj Mi estos kun via buŝo
kaj kun lia buŝo, kaj Mi instruos vin, kion vi devas
fari. **16** Kaj li parolos por vi al la popolo; kaj li estos
via buŝo, kaj vi estos por li anstataŭ Dio. **17** Kaj ĉi
tiun bastonon prenu en vian manon; per ĝi vi faros la
signojn. **18** Moseo iris kaj revenis al sia bopatro Jitro,
kaj diris al li: Mi volas iri kaj reveni al miaj fratoj, kiuj
estas en Egiptujo, kaj vidi, ĉu ili vivas ankoraŭ. Kaj
Jitro diris al Moseo: Iru en paco. **19** Kaj la Eternulo
diris al Moseo en Midjanujo: Iru, revenu Egiptujon;
ĉar mortis ĉiuj homoj, kiuj volis vin mortigi. **20** Tiam
Moseo prenis sian edzinon kaj siajn filojn kaj sidigis
ilin sur azeno, kaj ekiris al la lando Egipta. Kaj Moseo
prenis la bastonon de Dio en sian manon. **21** Kaj la
Eternulo diris al Moseo: Kiam vi revenos Egiptujon,
tiam rigardu, ĉiujn miraklojn, kiujn Mi donis en vian
manon, faru antaŭ Faraono. Sed Mi malmoligos lian
koron, kaj li ne permesos al la popolo foriri. **22** Kaj
vi diru al Faraono: Tiel diris la Eternulo: Mia filo
unuenaskita estas Izrael; **23** kaj Mi diras al vi: Permesu,
ke Mia filo iru kaj faru al Mi servon; se vi ne permesos
al li iri, tiam Mi mortigos vian unuenaskitan filon.
**24** Sur la vojo, en la noktohaltejo, renkontis lin la
Eternulo kaj volis mortigi lin; **25** sed Cipora prenis
akran ŝtonon, kaj detranĉis la prepucion de sia filo
kaj ektuŝis liajn piedojn, kaj diris: Sanga fianĉo vi
estas por mi. **26** Tiam Li forlasis lin. Kaj ŝi diris: Sanga
fianĉo per la cirkumcido. **27** Kaj la Eternulo diris al
Aaron: Iru renkonte al Moseo en la dezerton. Kaj li iris
kaj renkontis lin ĉe la monto de Dio, kaj kisis lin. **28**
Kaj Moseo diris al Aaron ĉiujn vortojn de la Eternulo,
kiu sendis lin, kaj ĉiujn signojn, pri kiuj Li ordonis al
li. **29** Kaj iris Moseo kaj Aaron kaj kunvenigis ĉiujn
ĉefojn de la Izraelidoj. **30** Kaj Aaron diris ĉiujn vortojn,
kiujn la Eternulo diris al Moseo, kaj li faris la signojn
antaŭ la popolo. **31** Kaj la popolo kredis. Kaj ili aŭdis,
ke la Eternulo rememoris la Izraelidojn kaj vidis ilian
mizeron, kaj ili kliniĝis kaj faris adoron.

**5** Poste venis Moseo kaj Aaron, kaj diris al Faraono:
Tiel diris la Eternulo, la Dio de Izrael: Permesu, ke
Mia popolo iru kaj faru al Mi feston en la dezerto. **2**
Sed Faraono diris: Kiu estas la Eternulo, kies voĉon
mi devas obei kaj lasi Izraelon iri? mi ne konas la
Eternulon, kaj al Izrael mi ne permesos iri. **3** Kaj ili
diris: La Dio de la Hebreoj vokis nin; permesu, ke ni
iru vojon de tri tagoj en la dezerton kaj ni alportu
oferon al la Eternulo, nia Dio, por ke Li ne frapu nin
per pesto aŭ glavo. **4** Sed la reĝo de Egiptujo diris al
ili: Kial vi, Moseo kaj Aaron, fortiras la popolon de
ĝiaj laboroj? iru al viaj laboroj. **5** Kaj Faraono diris:
Jen multenombra estas nun la popolo de la lando,
kaj vi volas liberigi ilin de iliaj laboroj! **6** Kaj Faraono
ordonis en tiu tago al la voktoj de la popolo kaj al
ĝiaj kontrolistoj, dirante: **7** Ne donu plu pajlon al
la popolo por la farado de la brikoj, kiel ĝis nun; ili
mem iru kaj kolektu al si pajlon. **8** Sed la nombron de
la brikoj, kiun ili pretigas ĝis nun, postulu de ili, ne
malgrandigu ĝin; ĉar ili vagas senlabore, tial ili krias:
Ni iru kaj alportu oferon al nia Dio. **9** Oni devas premi
tiujn homojn per la laboro, por ke ili estu okupitaj de
ĝi kaj ne atentu mensogajn vortojn. **10** Tiam eliris
la voktoj de la popolo kaj ĝiaj kontrolistoj, kaj diris
al la popolo: Tiel diras Faraono: Mi ne donos al vi
pajlon; **11** iru mem, prenu al vi pajlon, kie vi trovos;
sed el via laboro nenio estos deprenata. **12** Tiam la
popolo disiĝis en la tuta lando Egipta, por kolekti
pecojn da pajlo. **13** Kaj la voktoj insistadis, dirante:
Pretigu vian ĉiutagan laboron, kiel tiam, kiam vi havis
pajlon. **14** Kaj la kontrolistojn Izraelidojn, starigitajn
super ili de la voktoj de Faraono, oni batadis, dirante:
Kial vi ne pretigis vian ordonitan nombron da brikoj
hieraŭ kaj hodiaŭ, kiel ĝis nun? **15** La kontrolistoj
Izraelidoj venis kaj kriis al Faraono, dirante: Kial vi
agas tiel kun viaj sklavoj? **16** Pajlo ne estas donata
al viaj sklavoj, kaj brikojn oni ordonas al ni fari; kaj
nun viaj sklavoj estas batataj, kaj via popolo pekas. **17**

Sed li diris: Mallaboruloj vi estas, mallaboruloj, tial
vi diras: Ni iru, ni alportu oferon al la Eternulo. 18
Kaj nun iru, laboru, kaj pajlon oni ne donos al vi,
kaj la difinitan nombron da brikoj liveru. 19 Kaj la
kontrolistoj Izraelidoj vidis, ke estas al ili malbone,
ĉar estas dirite: Ne malgrandigu la ĉiutagan nombron
de viaj brikoj. 20 Ili renkontis Moseon kaj Aaronon,
kiuj staris antaŭ ili, kiam ili eliris de Faraono. 21
Kaj ili diris al tiuj: La Eternulo rigardu vin, kaj juĝu
vin por tio, ke vi malbonodorigis nian odoron antaŭ
Faraono kaj antaŭ liaj servantoj, kaj donis glavon en
iliajn manojn, por mortigi nin. 22 Tiam Moseo turnis
sin al la Eternulo, kaj diris: Mia Sinjoro! kial Vi faris
malbonon al tiu popolo? kial Vi sendis min? 23 De tiu
tempo, kiam mi venis al Faraono, por paroli en Via
nomo, li fariĝis pli malbona kontraŭ tiu popolo, kaj Vi
ne savis Vian popolon.

6 Sed la Eternulo diris al Moseo: Nun vi vidos, kion Mi
faros al Faraono; ĉar pro mano forta li foririgos ilin
kaj pro mano forta li elpelos ilin el sia lando. 2 Kaj Dio
ekparolis al Moseo kaj diris al li: Mi estas la ETERNULO.
3 Mi aperis al Abraham, al Isaak, kaj al Jakob kiel Dio
la Plejpotenca, sed Mian nomon ETERNULO Mi ne
sciigis al ili. 4 Mi starigis Mian interligon kun ili, ke
Mi donos al ili la landon Kanaanan, la landon de ilia
migrado, en kiu ili loĝis kiel fremduloj. 5 Kaj Mi aŭdis
la ĝemadon de la Izraelidoj, kiujn la Egiptoj premas
per laboroj, kaj Mi rememoris Mian interligon. 6
Tial diru al la Izraelidoj: Mi estas la Eternulo, kaj Mi
elirigos vin el sub la jugo de Egiptujo, kaj Mi liberigos
vin el ilia sklaveco, kaj Mi savos vin per etendita
brako kaj grandaj juĝoj. 7 Kaj Mi prenos vin kiel Mian
popolon, kaj Mi estos via Dio; kaj vi scios, ke Mi estas
la Eternulo, via Dio, kiu elirigas vin el sub la jugo de
Egiptujo. 8 Kaj Mi venigos vin en la landon, pri kiu
Mi, levinte Mian manon, promesis, ke Mi donos ĝin al
Abraham, al Isaak, kaj al Jakob, kaj Mi donos ĝin al
vi kiel posedaĵon, Mi, la Eternulo. 9 Moseo parolis
tiel al la Izraelidoj; sed ili ne aŭskultis Moseon pro
malforteco de spirito kaj pro la malfacilaj laboroj. 10
Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 11 Eniru,
diru al Faraono, la reĝo de Egiptujo, ke li ellasu la
Izraelidojn el sia lando. 12 Moseo ekparolis antaŭ la
Eternulo, dirante: Jen la Izraelidoj ne aŭskultas min,
kiel do min aŭskultos Faraono? kaj mi havas nelertajn
lipojn. 13 Sed la Eternulo ekparolis al Moseo kaj al
Aaron, kaj donis al ili ordonojn por la Izraelidoj, kaj
por Faraono, reĝo de Egiptujo, por elirigi la Izraelidojn
el la lando Egipta. 14 Jen estas la ĉefoj de iliaj familioj:
la filoj de Ruben, unuenaskito de Izrael: Ĥanoĥ kaj
Palu, Ĥecron kaj Karmi. Tio estas la familioj de Ruben.
15 Kaj la filoj de Simeon: Jemuel kaj Jamin kaj Ohad
kaj Jaĥin kaj Coĥar, kaj Ŝaul, filo de Kanaanidino. Tio
estas la familioj de Simeon. 16 Kaj jen estas la nomoj
de la filoj de Levi laŭ ilia naskiĝo: Gerŝon kaj Kehat kaj
Merari. La daŭro de la vivo de Levi estis cent tridek
sep jaroj. 17 La filoj de Gerŝon: Libni kaj Ŝimei, kun
iliaj familioj. 18 Kaj la filoj de Kehat: Amram kaj Jichar
kaj Ĥebron kaj Uziel. La daŭro de la vivo de Kehat
estis cent tridek tri jaroj. 19 Kaj la filoj de Merari:
Maĥli kaj Muŝi. Tio estas la familioj de Levi laŭ ilia
naskiĝo. 20 Amram prenis al si sian onklinon Joĥebed
kiel edzinon, kaj ŝi naskis al li Aaronon kaj Moseon.
La daŭro de la vivo de Amram estis cent tridek sep
jaroj. 21 Kaj la filoj de Jichar: Koraĥ kaj Nefeg kaj Ziĥri.
22 Kaj la filoj de Uziel: Miŝael kaj Elcafan kaj Sitri.
23 Aaron prenis al si Eliŝeban, filinon de Aminadab
kaj fratinon de Naĥŝon, kiel edzinon, kaj ŝi naskis al
li Nadabon kaj Abihun, Eleazaron kaj Itamaron. 24
Kaj la filoj de Koraĥ: Asir kaj Elkana kaj Abiasaf. Tio
estas la familioj de la Koraĥidoj. 25 Eleazar, la filo
de Aaron, prenis al si edzinon el la filinoj de Putiel,
kaj ŝi naskis al li Pineĥason. Tio estas la ĉefoj de la
Leviidoj laŭ iliaj familioj. 26 Tio estas tiuj Aaron kaj
Moseo, al kiuj la Eternulo diris: Elirigu la Izraelidojn
el la lando Egipta laŭ iliaj taĉmentoj. 27 Tio estas ili,
kiuj parolis al Faraono, reĝo de Egiptujo, por elirigi la
Izraelidojn el Egiptujo; tio estas Moseo kaj Aaron. 28
En tiu tago, kiam la Eternulo parolis al Moseo en la
lando Egipta, 29 la Eternulo diris al Moseo jene: Mi
estas la Eternulo. Diru al Faraono, reĝo de Egiptujo,
ĉion, kion Mi diras al vi. 30 Kaj Moseo diris antaŭ
la Eternulo: Jen mi havas nelertajn lipojn; kiel do
Faraono min aŭskultos?

7 Sed la Eternulo diris al Moseo: Vidu, mi faris vin dio
por Faraono; kaj via frato Aaron estos via profeto.
2 Vi parolos ĉion, kion Mi ordonos al vi; kaj via frato
Aaron parolos al Faraono, ke li ellasu la Izraelidojn el
sia lando. 3 Sed Mi malmoligos la koron de Faraono,
kaj Mi multigos Miajn signojn kaj Miajn miraklojn en
la lando Egipta. 4 Kaj Faraono vin ne aŭskultos, kaj
Mi metos Mian manon sur Egiptujon, kaj Mi elirigos

Mian militistaron, Mian popolon, la Izraelidojn, el
la lando Egipta per grandaj juĝoj. 5 Kaj la Egiptoj
sciiĝos, ke Mi estas la Eternulo, kiam Mi etendos Mian
manon super la Egiptojn kaj elirigos la Izraelidojn el
inter ili. 6 Kaj Moseo kaj Aaron faris, kiel ordonis al
ili la Eternulo; tiel ili faris. 7 Moseo havis la aĝon de
okdek jaroj, kaj Aaron havis la aĝon de okdek tri jaroj,
kiam ili parolis al Faraono. 8 Kaj la Eternulo ekparolis
al Moseo kaj al Aaron, dirante: 9 Se Faraono diros
al vi, ke vi faru miraklon, tiam diru al Aaron: Prenu
vian bastonon kaj ĵetu ĝin antaŭ Faraonon; ĝi fariĝos
serpento. 10 Moseo kaj Aaron venis al Faraono, kaj
faris tiel, kiel ordonis la Eternulo. Aaron ĵetis sian
bastonon antaŭ Faraonon kaj antaŭ liajn servantojn,
kaj ĝi fariĝis serpento. 11 Tiam ankaŭ Faraono alvokis
la saĝulojn kaj sorĉistojn; kaj ankaŭ ili, la Egiptaj
sorĉistoj, per siaj sorĉoj faris tiel. 12 Ĉiu el ili ĵetis sian
bastonon, kaj ili fariĝis serpentoj; sed la bastono de
Aaron englutis iliajn bastonojn. 13 Kaj malmoliĝis la
koro de Faraono, kaj li ne aŭskultis ilin, kiel diris la
Eternulo. 14 Tiam la Eternulo diris al Moseo: Obstina
estas la koro de Faraono, li ne volas forliberigi la
popolon. 15 Iru al Faraono matene; li eliros al la akvo;
stariĝu renkonte al li sur la bordo de la rivero, kaj la
bastonon, kiu transformiĝis en serpenton, prenu en
vian manon. 16 Kaj diru al li: La Eternulo, Dio de la
Hebreoj, sendis min al vi, por diri: Permesu al Mia
popolo iri kaj fari al Mi servon en la dezerto; sed jen
vi ĝis nun ne obeis. 17 Tiel diris la Eternulo: Per tio vi
sciiĝos, ke Mi estas la Eternulo: jen per la bastono,
kiu estas en mia mano, mi frapos la akvon, kiu estas
en la rivero, kaj ĝi transformiĝos en sangon. 18 Kaj
la fiŝoj, kiuj estas en la rivero, mortos, kaj la rivero
malbonodoros, kaj la Egiptoj abomenos trinki akvon
el la rivero. 19 Kaj la Eternulo diris al Moseo: Diru al
Aaron: Prenu vian bastonon, kaj etendu vian manon
super la akvojn de la Egiptoj, super iliajn riverojn,
super iliajn torentojn kaj super iliajn lagojn kaj super
ĉian kolektiĝon de iliaj akvoj, kaj ili fariĝu sango; kaj
estu sango en la tuta lando Egipta, en la vazoj lignaj
kaj en la vazoj ŝtonaj. 20 Kaj Moseo kaj Aaron faris tiel,
kiel ordonis la Eternulo. Kaj li levis la bastonon, kaj
frapis la akvon, kiu estis en la rivero, antaŭ la okuloj
de Faraono kaj antaŭ la okuloj de liaj servantoj; kaj
la tuta akvo, kiu estis en la rivero, transformiĝis en
sangon. 21 Kaj la fiŝoj, kiuj estis en la rivero, mortis,
kaj la rivero fariĝis malbonodora, kaj la Egiptoj ne
povis trinki akvon el la rivero; kaj estis sango en la
tuta lando Egipta. 22 Sed tiel same faris la sorĉistoj
de Egiptujo per siaj sorĉoj. Kaj malmoliĝis la koro de
Faraono, kaj li ne aŭskultis ilin, kiel diris la Eternulo.
23 Kaj Faraono turniĝis kaj eniris en sian domon, kaj
lia koro ne atentis eĉ tion. 24 Kaj ĉiuj Egiptoj ekfosis
ĉirkaŭ la rivero pro akvo por trinki, ĉar ili ne povis
trinki la akvon el la rivero. 25 Pasis sep tagoj, post
kiam la Eternulo frapis la riveron.

**8** Kaj la Eternulo diris al Moseo: Iru al Faraono,
kaj diru al li: Tiel diris la Eternulo: Permesu al
Mia popolo iri, por ke ĝi faru servon al Mi. 2 Kaj se
vi ne volos permesi tion, jen Mi frapos vian tutan
regionon per ranoj; 3 kaj eksvarmos la rivero per
ranoj, kaj ili elrampos kaj venos en vian domon kaj
en vian dormoĉambron kaj sur vian liton kaj en la
domojn de viaj servantoj kaj de via popolo kaj en
viajn fornojn kaj en viajn pastujojn; 4 kaj sur vin
kaj sur vian popolon kaj sur ĉiujn viajn servantojn
rampos la ranoj. 5 Kaj la Eternulo diris al Moseo: Diru
al Aaron: Etendu vian manon kun via bastono super
la riverojn, super la torentojn, kaj super la lagojn, kaj
elirigu la ranojn sur la landon Egiptan. 6 Kaj Aaron
etendis sian manon super la akvojn de Egiptujo, kaj
la ranoj eliris kaj kovris la landon Egiptan. 7 Tion
saman faris la sorĉistoj per siaj sorĉoj, kaj ili elirigis la
ranojn sur la landon Egiptan. 8 Tiam Faraono alvokis
Moseon kaj Aaronon, kaj diris: Preĝu al la Eternulo,
ke Li forigu la ranojn for de mi kaj de mia popolo;
tiam mi forliberigos la popolon, ke ĝi alportu oferon
al la Eternulo. 9 Kaj Moseo diris al Faraono: Ordonu al
mi, por kiu tempo mi devas preĝi pro vi kaj pro viaj
servantoj kaj pro via popolo, ke malaperu la ranoj
for de vi kaj el viaj domoj kaj nur en la rivero ili
restu. 10 Tiu diris: Por morgaŭ. Kaj li diris: Ĝi estu,
kiel vi diris, por ke vi sciu, ke ekzistas neniu tia,
kiel la Eternulo, nia Dio. 11 Kaj foriĝos la ranoj for
de vi kaj de viaj domoj kaj de viaj servantoj kaj de
via popolo; nur en la rivero ili restos. 12 Moseo kaj
Aaron eliris for de Faraono, kaj Moseo ekvokis al la
Eternulo pri la ranoj, kiujn li venigis sur Faraonon.
13 Kaj la Eternulo faris laŭ la vortoj de Moseo; kaj
mortis la ranoj en la domoj, en la kortoj, kaj sur la
kampoj. 14 Kaj oni kunŝovelis ilin en multajn amasojn,
kaj la lando malbonodoriĝis. 15 Sed kiam Faraono
vidis, ke fariĝis faciliĝo, li malmoligis sian koron kaj
ne aŭskultis ilin, kiel diris la Eternulo. 16 Tiam la

Eternulo diris al Moseo: Diru al Aaron: Etendu vian
bastonon, kaj frapu la polvon de la tero, kaj el ĝi
fariĝos pikmuŝoj en la tuta lando Egipta. 17 Ili faris
tiel: Aaron etendis sian manon kun sia bastono kaj
frapis la polvon de la tero, kaj aperis pikmuŝoj sur la
homoj kaj la brutoj. La tuta polvo de la tero fariĝis
pikmuŝoj en la tuta lando Egipta. 18 Tiel faris la
sorĉistoj per siaj sorĉoj, por elirigi pikmuŝojn, sed ili
ne povis. Kaj la pikmuŝoj estis sur la homoj kaj sur la
brutoj. 19 Tiam la sorĉistoj diris al Faraono: Ĝi estas
fingro de Dio. Sed la koro de Faraono restis obstina,
kaj li ne aŭskultis ilin, kiel diris la Eternulo. 20 Kaj
la Eternulo diris al Moseo: Leviĝu frue matene, kaj
stariĝu antaŭ Faraono, kiam li iros al la akvo, kaj diru
al li: Tiel diris la Eternulo: Forliberigu Mian popolon,
ke ĝi faru servon al Mi. 21 Ĉar se vi ne forliberigos
Mian popolon, jen Mi venigos sur vin kaj sur viajn
servantojn kaj sur vian popolon kaj en viajn domojn
fiinsektojn; kaj pleniĝos de la fiinsektoj la domoj de
la Egiptoj, kaj ankaŭ la tero, sur kiu ili estas. 22 Kaj
Mi distingos en tiu tago la teron de Goŝen, sur kiu
troviĝas Mia popolo, ke tie ne estu fiinsektoj; por ke vi
sciiĝu, ke Mi estas la Eternulo meze de la tero. 23 Kaj
Mi faros apartigon inter Mia popolo kaj via popolo;
morgaŭ okazos tiu signo. 24 Kaj la Eternulo faris
tiel, kaj aperis multego da fiinsektoj en la domo de
Faraono kaj en la domoj de liaj servantoj kaj en la tuta
lando Egipta; difektiĝis la tero kaŭze de la fiinsektoj.
25 Tiam Faraono alvokis Moseon kaj Aaronon, kaj diris:
Iru, alportu oferon al via Dio en la lando. 26 Sed Moseo
diris: Ne estas oportune fari tiel; ĉar abomenindaĵo
por la Egiptoj estus nia oferado al la Eternulo, nia
Dio; se oferadon abomenindan por la Egiptoj ni faros
antaŭ iliaj okuloj, ĉu ili tiam nin ne ŝtonmortigos?
27 Vojon de tri tagoj ni iros en la dezerton, kaj ni
faros oferon al la Eternulo, nia Dio, kiel Li diros al
ni. 28 Tiam Faraono diris: Mi forliberigos vin, kaj vi
faros oferon al la Eternulo, via Dio, en la dezerto;
nur ne foriru malproksime; preĝu pro mi. 29 Kaj
Moseo diris: Jen mi foriras de vi, kaj mi preĝos al la
Eternulo, ke foriĝu la fiinsektoj for de Faraono, de
liaj servantoj, kaj de lia popolo morgaŭ; sed Faraono
ne plu trompu, ne forliberigante la popolon, por fari
oferon al la Eternulo. 30 Moseo eliris for de Faraono
kaj preĝis al la Eternulo. 31 Kaj la Eternulo faris, kiel
diris Moseo, kaj forigis la fiinsektojn for de Faraono,
de liaj servantoj, kaj de lia popolo; ne restis eĉ unu. 32
Sed Faraono obstinigis sian koron ankaŭ ĉi tiun fojon,
kaj ne forliberigis la popolon.

**9** Kaj la Eternulo diris al Moseo: Iru al Faraono, kaj
diru al li: Tiel diris la Eternulo, Dio de la Hebreoj:
Forliberigu Mian popolon, ke ĝi faru al Mi servon. 2
Ĉar se vi ne volos forliberigi kaj vi plue ilin retenos, 3
jen la mano de la Eternulo estos sur viaj brutoj, kiuj
estas sur la kampo, sur la ĉevaloj, sur la azenoj, sur la
kameloj, sur la bovoj, kaj sur la ŝafoj; estos sur ili tre
forta pesto. 4 Kaj la Eternulo faros apartigon inter la
brutoj de la Izraelidoj kaj la brutoj de la Egiptoj; kaj
el ĉio, kio apartenas al la Izraelidoj, mortos nenio.
5 Kaj la Eternulo difinis tempon, dirante: Morgaŭ
la Eternulo faros tiun aferon en la lando. 6 Kaj la
Eternulo faris tion en la sekvanta tago, kaj mortis ĉiuj
brutoj de la Egiptoj, sed el la brutoj de la Izraelidoj ne
mortis eĉ unu. 7 Faraono sendis, kaj oni vidis, ke el la
brutoj de la Izraelidoj ne mortis eĉ unu. Sed la koro de
Faraono estis obstina, kaj li ne forliberigis la popolon.
8 Tiam la Eternulo diris al Moseo kaj al Aaron: Prenu
al vi plenmanojn da cindro el la forno, kaj Moseo ĵetu
ĝin al la ĉielo antaŭ la okuloj de Faraono. 9 Kaj ĝi
fariĝos polvo super la tuta lando Egipta, kaj sur la
homoj kaj sur la bestoj fariĝos el ĝi brulumaj abscesoj
en la tuta lando Egipta. 10 Kaj ili prenis cindron el la
forno kaj stariĝis antaŭ Faraono, kaj Moseo ĵetis ĝin al
la ĉielo, kaj aperis brulumaj abscesoj sur la homoj
kaj sur la bestoj. 11 Kaj la sorĉistoj ne povis teni sin
antaŭ Moseo pro la abscesoj, ĉar la abscesoj estis sur
la sorĉistoj kaj sur ĉiuj Egiptoj. 12 Sed la Eternulo
obstinigis la koron de Faraono, kaj li ne aŭskultis ilin,
kiel diris la Eternulo al Moseo. 13 Tiam la Eternulo
diris al Moseo: Leviĝu frue matene kaj stariĝu antaŭ
Faraono, kaj diru al li: Tiel diris la Eternulo, Dio de la
Hebreoj: Forliberigu Mian popolon, ke ĝi faru al Mi
servon. 14 Ĉar ĉi tiun fojon Mi sendos ĉiujn Miajn
frapojn en vian koron kaj sur viajn servantojn kaj sur
vian popolon, por ke vi sciu, ke ne ekzistas simila
al Mi sur la tuta tero. 15 Ĉar nun Mi etendus Mian
manon kaj batus vin kaj vian popolon per pesto, kaj
vi malaperus de la tero; 16 sed nur por tio Mi vin
konservis, ke Mi montru sur vi Mian forton, kaj por ke
oni rakontu pri Mia nomo sur la tuta tero. 17 Ankoraŭ
vi retenas Mian popolon, kaj ne forliberigas ĝin. 18
Jen morgaŭ en ĉi tiu tempo Mi pluvigos tre grandan
hajlon, tian, ke simila al ĝi ne estis en Egiptujo de

post la tago de ĝia fondiĝo ĝis nun. 19 Kaj nun sendu,
kolektu viajn brutojn, kaj ĉion, kion vi havas sur la
kampo; sur ĉiun homon kaj bruton, kiuj troviĝos
sur la kampo kaj ne kolektiĝos en la domon, falos la
hajlo, kaj ili mortos. 20 Kiu el la servantoj de Faraono
timis la vorton de la Eternulo, tiu rapide envenigis
siajn sklavojn kaj brutojn en la domojn; 21 sed kiu
ne atentis la vorton de la Eternulo, tiu lasis siajn
sklavojn kaj siajn brutojn sur la kampo. 22 Kaj la
Eternulo diris al Moseo: Etendu vian manon al la
ĉielo, kaj venos hajlo en la tuta lando Egipta, sur la
homojn kaj sur la brutojn kaj sur ĉiujn herbojn de la
kampo en la lando Egipta. 23 Kaj Moseo etendis sian
bastonon al la ĉielo; kaj la Eternulo aperigis tondrojn
kaj hajlon, kaj fajro iris sur la teron, kaj la Eternulo
pluvigis hajlon sur la landon Egiptan. 24 Kaj estis
hajlo, kaj fajro ekflamadis meze de la hajlo, en tiel
forta grado, ke io simila neniam estis en la tuta lando
Egipta de post la tempo, kiam en ĝi aperis popolo. 25
Kaj la hajlo batdifektis en la tuta lando Egipta ĉion,
kio estis sur la kampo; homojn kaj brutojn kaj ĉiun
herbon de la kampo batdifektis la hajlo, kaj ĉiujn
arbojn de la kampo ĝi rompis. 26 Nur en la lando
Goŝen, kie estis la Izraelidoj, ne estis hajlo. 27 Tiam
Faraono sendis, kaj alvokis Moseon kaj Aaronon, kaj
diris al ili: Mi pekis la nunan fojon; la Eternulo estas
la pravulo, mi kaj mia popolo estas la malpravuloj. 28
Preĝu al la Eternulo, ke ĉesiĝu la tondroj de Dio kaj la
hajlo; tiam mi forliberigos vin, kaj vi ne plu restos.
29 Kaj Moseo diris al li: Kiam mi eliros el la urbo,
mi etendos miajn manojn al la Eternulo; la tondroj
ĉesiĝos kaj la hajlo ne plu estos, por ke vi sciiĝu, ke al
la Eternulo apartenas la tero. 30 Sed mi scias, ke vi kaj
viaj servantoj ankoraŭ ne timas Dion, la Eternulon. 31
La lino kaj la hordeo estis batdifektitaj, ĉar la hordeo
havis spikojn kaj la lino havis burĝonojn; 32 sed la
tritiko kaj la spelto ne estis batdifektitaj, ĉar ili estis
malfrusezonaj. 33 Moseo eliris de Faraono el la urbo
kaj etendis siajn manojn al la Eternulo; tiam ĉesiĝis la
tondroj kaj la hajlo, kaj pluvo ne plu verŝiĝis sur la
teron. 34 Kiam Faraono vidis, ke ĉesiĝis la pluvo kaj la
hajlo kaj la tondroj, tiam li plue pekis kaj obstinigis
sian koron, li kaj liaj servantoj. 35 La koro de Faraono
restis obstina, kaj li ne forliberigis la Izraelidojn, kiel
diris la Eternulo per Moseo.

**10** Kaj la Eternulo diris al Moseo: Iru al Faraono,
ĉar Mi obstinigis lian koron kaj la korojn de liaj
servantoj, por ke Mi faru ĉi tiujn Miajn signojn inter
ili; 2 kaj por ke vi rakontu al via filo kaj al via nepo,
kion Mi plenumis sur la Egiptoj, kaj pri Miaj signoj,
kiujn Mi faris inter ili; kaj por ke vi sciu, ke Mi estas
la Eternulo. 3 Moseo kaj Aaron venis al Faraono, kaj
diris al li: Tiel diris la Eternulo, Dio de la Hebreoj: Ĝis
kiam vi rifuzos humiliĝi antaŭ Mi? forliberigu Mian
popolon, ke ĝi faru al Mi servon. 4 Ĉar se vi rifuzos
forliberigi Mian popolon, jen Mi venigos morgaŭ
akridojn en vian regionon; 5 kaj ili kovros la supraĵon
de la tero tiel, ke oni ne povos vidi la teron; kaj ili
formanĝos ĉion, kio restis ĉe vi savita kontraŭ la hajlo,
kaj ili ĉirkaŭmanĝos ĉiujn arbojn, kiuj kreskas ĉe vi
sur la kampo; 6 kaj ili plenigos viajn domojn kaj la
domojn de ĉiuj viaj servantoj kaj la domojn de ĉiuj
Egiptoj tiel, kiel ne vidis viaj patroj kaj viaj prapatroj
de post la tago, kiam ili aperis sur la tero ĝis la nuna
tago. Kaj li turniĝis kaj eliris for de Faraono. 7 Tiam la
servantoj de Faraono diris al li: Ĝis kiam tiu homo
estos por ni suferilo? forliberigu tiujn homojn, por ke
ili faru servon al la Eternulo, ilia Dio; ĉu vi ankoraŭ ne
vidas, ke Egiptujo pereas? 8 Kaj oni revenigis denove
Moseon kaj Aaronon al Faraono, kaj ĉi tiu diris al ili:
Iru, faru servon al la Eternulo, via Dio; sed kiuj estas
la irontoj? 9 Tiam Moseo diris: Kun niaj junuloj kaj
maljunuloj ni iros, kun niaj filoj kaj niaj filinoj, kun
niaj ŝafoj kaj niaj bovoj ni iros, ĉar ni havas feston
de la Eternulo. 10 Kaj li diris al ili: Tiel la Eternulo
estu kun vi, se mi forliberigos vin kaj viajn infanojn!
ĉu vi ne havas ian malbonan intencon? 11 Ne; iru
nur la viroj kaj faru servon al la Eternulo, ĉar tion vi
petas. Kaj oni elpelis ilin for de Faraono. 12 Tiam la
Eternulo diris al Moseo: Etendu vian manon super
la landon Egiptan pro la akridoj, ke ili venu sur la
landon Egiptan, kaj formanĝu ĉiujn herbojn de la
tero, ĉion, kion restigis la hajlo. 13 Kaj Moseo etendis
sian bastonon super la landon Egiptan, kaj la Eternulo
direktis orientan venton sur la landon dum tiu tuta
tago kaj dum la tuta nokto. Kiam fariĝis mateno, la
orienta vento alportis la akridojn. 14 Kaj la akridoj
venis sur la tutan landon Egiptan kaj sidiĝis en la
tuta Egipta regiono en tre granda amaso; antaŭ ili
neniam estis akridaro simila al ili, kaj poste neniam
estos tia. 15 Kaj ili kovris la tutan supraĵon de la tero,
kaj la tero fariĝis malluma; kaj ili formanĝis la tutan

herbon de la kampo, kaj ĉiujn arbajn fruktojn, kiujn
restigis la hajlo; kaj restis nenia verdaĵo sur la arboj
aŭ inter la herboj de la kampo en la tuta lando Egipta.
16 Tiam Faraono rapide alvokis Moseon kaj Aaronon,
kaj diris: Mi pekis antaŭ la Eternulo, via Dio, kaj antaŭ
vi. 17 Sed nun pardonu mian pekon nur ĉi tiun fojon,
kaj preĝu al la Eternulo, via Dio, ke Li forigu de mi
nur ĉi tiun morton. 18 Kaj li eliris for de Faraono kaj
preĝis al la Eternulo. 19 Kaj la Eternulo venigis de la
kontraŭa flanko venton okcidentan tre fortan, kaj ĝi
levis la akridojn kaj ĵetis ilin en la Ruĝan Maron; ne
restis eĉ unu akrido en la tuta Egipta regiono. 20 Sed
la Eternulo obstinigis la koron de Faraono, kaj li ne
forliberigis la Izraelidojn. 21 Tiam la Eternulo diris
al Moseo: Etendu vian manon al la ĉielo, kaj fariĝos
mallumo en la lando Egipta, palpebla mallumo. 22
Kaj Moseo etendis sian manon al la ĉielo, kaj fariĝis
densa mallumo en la tuta lando Egipta dum tri tagoj.
23 Oni ne vidis unu alian, kaj neniu leviĝis de sia
loko dum tri tagoj; sed ĉiuj Izraelidoj havis lumon
en siaj loĝejoj. 24 Tiam Faraono alvokis Moseon, kaj
diris: Iru, faru servon al la Eternulo; nur viaj ŝafoj
kaj viaj bovoj restu; ankaŭ viaj infanoj iru kun vi.
25 Sed Moseo diris: Vi devas ankaŭ doni en niajn
manojn oferojn kaj bruloferojn, kiujn ni alportos al
la Eternulo, nia Dio. 26 Ankaŭ niaj brutoj iros kun
ni, ne restos eĉ unu hufo; ĉar el ili ni prenos, por
fari servon al la Eternulo, nia Dio; kaj ni ne scias, per
kio ni devas servi al la Eternulo, ĝis ni venos tien. 27
Kaj la Eternulo obstinigis la koron de Faraono, kaj li
ne volis forliberigi ilin. 28 Kaj Faraono diris al li: Iru
for de mi! gardu vin, ke vi ne venu plu antaŭ mian
vizaĝon; ĉar en la tago, en kiu vi venos antaŭ mian
vizaĝon, vi mortos. 29 Tiam Moseo diris: Tiel vi diris;
mi ne venos do plu antaŭ vian vizaĝon.

11 Kaj la Eternulo diris al Moseo: Ankoraŭ unu
punon Mi venigos sur Faraonon kaj sur Egiptujon;
post tio li forliberigos vin el ĉi tie; kaj forliberigante,
li tute elpelos vin el ĉi tie. 2 Diru nun al la popolo, ke
ili petu ĉiu viro de sia proksimulo kaj ĉiu virino de sia
proksimulino vazojn arĝentajn kaj vazojn orajn. 3 Kaj
la Eternulo donis al la popolo favoron ĉe la Egiptoj;
kaj ankaŭ Moseo estis tre granda homo en la lando
Egipta, en la okuloj de la servantoj de Faraono kaj en
la okuloj de la popolo. 4 Kaj Moseo diris: Tiel diris la
Eternulo: En la mezo de la nokto Mi iros internen de
Egiptujo. 5 Kaj mortos ĉiu unuenaskito en la lando
Egipta, de la unuenaskito de Faraono, kiu sidas sur
sia trono, ĝis la unuenaskito de la sklavino, kiu sidas
malantaŭ la muelejo; kaj ĉiu unuenaskito el la brutoj.
6 Kaj estos granda kriado en la tuta lando Egipta, tia,
ke simila al ĝi neniam estis kaj neniam plu estos. 7
Sed ĉe ĉiuj Izraelidoj ne movos hundo sian langon,
nek kontraŭ homon, nek kontraŭ bruton; por ke vi
sciu, kiel la Eternulo faras apartigon inter la Egiptoj
kaj la Izraelidoj. 8 Kaj venos ĉiuj viaj sklavoj al mi kaj
terĵetiĝos antaŭ mi, dirante: Eliru vi kaj la tuta popolo,
kiu vin sekvas. Post tio mi eliros. Kaj li eliris for de
Faraono kun granda kolero. 9 Kaj la Eternulo diris
al Moseo: Faraono vin ne aŭskultos; por ke multiĝu
Miaj mirakloj en la lando Egipta. 10 Kaj Moseo kaj
Aaron faris ĉiujn tiujn miraklojn antaŭ Faraono; sed
la Eternulo obstinigis la koron de Faraono, kaj li ne
forliberigis la Izraelidojn el sia lando.

12 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo kaj al Aaron
en la lando Egipta, dirante: 2 Ĉi tiu monato
estu por vi komenco de la monatoj; la unua ĝi estu
por vi inter la monatoj de la jaro. 3 Diru al la tuta
komunumo de Izrael: En la deka tago de ĉi tiu monato
prenu al si ŝafidon ĉiu patro de familio, po unu ŝafido
por domo. 4 Kaj se en la domo estas tro malmulte
da personoj por tuta ŝafido, tiam li prenu kune kun
sia najbaro plej proksima al lia domo; laŭ la nombro
de la animoj, laŭ la kvanto de manĝado de ĉiu, ili
kalkulu sin por la ŝafido. 5 La ŝafido estu sendifekta,
virseksa, havanta la aĝon de unu jaro; el la ŝafoj aŭ el
la kaproj vi povas preni. 6 Konservu ĝin ĝis la dek-
kvara tago de ĉi tiu monato; kaj la tuta komunumo de
Izrael buĉu ĝin en la komenco de vespero. 7 Kaj ili
prenu iom el la sango, kaj ŝmiru sur ambaŭ fostoj kaj
sur la supra sojlo de la domoj, en kiuj ili ĝin manĝos.
8 Kaj ili manĝu la viandon en tiu nokto, rostitan sur
fajro; kaj macojn kun maldolĉaj herboj ili manĝu. 9
Ne manĝu ĝin duonkrudan, nek kuiritan en akvo,
sed nur rostitan sur fajro kun ĝiaj kapo, kruroj, kaj
internaĵoj. 10 Ne restigu iom el ĝi ĝis la mateno; kio
restos el ĝi ĝis la mateno, tion bruligu per fajro. 11 Kaj
tiele manĝu ĝin; via lumbo estu zonita, viaj ŝuoj sur
viaj piedoj, kaj via bastono en via mano; kaj manĝu
ĝin rapidante; ĝi estas Pasko de la Eternulo. 12 Kaj Mi
trairos la landon Egiptan en tiu nokto, kaj Mi batos
ĉiun unuenaskiton en la lando Egipta, de la homoj

ĝis la brutoj; kaj super ĉiuj dioj de Egiptujo Mi faros
juĝon, Mi, la Eternulo. 13 Kaj la sango ĉe vi estos signo
sur la domoj, en kiuj vi troviĝas; kiam Mi vidos la
sangon, Mi pasos preter vi, kaj ne estos inter vi la
eksterma puno, kiam Mi batos la landon Egiptan. 14
Kaj tiu tago estu por vi memoraĵo; kaj festu ĝin kiel
feston de la Eternulo en viaj generacioj, kiel leĝon
por eterne festu ĝin. 15 Dum sep tagoj manĝu macojn;
en la unua tago forigu la fermentaĵon el viaj domoj;
ĉiu kiu manĝos fermentaĵon de la unua tago ĝis la
sepa tago, ties animo estos ekstermita el Izrael. 16
Kaj en la unua tago faru al vi sanktan kunvenon, kaj
en la sepa tago faru al vi sanktan kunvenon; nenia
laboro estu farata en tiuj tagoj; nur kio estas necesa
por manĝi por ĉiu, nur tio sola povas esti farata de vi.
17 Kaj observu la ordonon pri la macoj, ĉar ĝuste en
tiu tago Mi elkondukis viajn taĉmentojn el la lando
Egipta; kaj observu tiun tagon en viaj generacioj kiel
leĝon eternan. 18 De post la vespero de la dek-kvara
tago de la unua monato manĝu macojn ĝis la vespero
de la dudek-unua tago de la monato. 19 Dum sep
tagoj fermentaĵo ne troviĝu en viaj domoj; ĉar kiu
manĝos fermentaĵon, ties animo ekstermiĝos el la
komunumo de Izrael, ĉu li estas fremdulo, aŭ ĉu li
estas indiĝeno de la lando. 20 Nenion fermentintan
manĝu; en ĉiuj viaj loĝlokoj manĝu macojn. 21 Moseo
alvokis ĉiujn ĉefojn de Izrael, kaj diris al ili: Elektu
kaj prenu al vi ŝafidojn laŭ viaj familioj, kaj buĉu la
Paskon. 22 Kaj prenu faskon da hisopo, kaj trempu ĝin
en la sango, kiu estos en la pelvo, kaj tuŝu la supran
sojlon kaj ambaŭ fostojn per la sango, kiu estos en la
pelvo; kaj neniu el vi eliru el la pordo de sia domo
ĝis la mateno. 23 Kaj la Eternulo trairos, por puni la
Egiptojn; kiam Li vidos la sangon sur la supra sojlo
kaj ambaŭ fostoj, tiam la Eternulo preterpasos la
pordon kaj ne permesos al la ekstermanto veni en
viajn domojn por puni. 24 Kaj observu ĉi tion kiel
leĝon por vi kaj por viaj filoj eterne. 25 Kaj kiam vi
venos en la landon, kiun la Eternulo donos al vi, kiel
Li diris, observu ĉi tiun servon. 26 Kaj kiam diros al vi
viaj filoj: Kion signifas ĉi tiu via servo? 27 tiam diru:
Ĝi estas ofero de Pasko al la Eternulo, kiu preterpasis
la domojn de la Izraelidoj en Egiptujo, kiam Li punis
la Egiptojn, sed niajn domojn savis. Kaj la popolo
kliniĝis kaj faris adoron. 28 Kaj la Izraelidoj iris, kaj
faris, kiel ordonis la Eternulo al Moseo kaj Aaron;
tiel ili faris. 29 Kiam venis la noktomezo, la Eternulo
batis ĉiujn unuenaskitojn en la lando Egipta, de la
unuenaskito de Faraono, sidanta sur sia trono, ĝis la
unuenaskito de malliberulo, sidanta en malliberejo;
kaj ĉiujn unuenaskitojn el la brutoj. 30 Tiam Faraono
leviĝis en la nokto, li kaj ĉiuj liaj servantoj kaj ĉiuj
Egiptoj; kaj fariĝis granda kriado en Egiptujo; ĉar ne
estis domo, en kiu ne estis mortinto. 31 Kaj li alvokis
Moseon kaj Aaronon en la nokto, kaj diris: Leviĝu,
foriru el inter mia popolo, vi kaj la Izraelidoj; kaj iru,
faru servon al la Eternulo, kiel vi diris. 32 Ankaŭ viajn
ŝafojn kaj viajn bovojn prenu, kiel vi diris, kaj iru; kaj
benu ankaŭ min. 33 Kaj la Egiptoj urĝis sur la popolon,
por pli rapide elirigi ilin el la lando; ĉar ili diris: Ni ĉiuj
mortos. 34 Kaj la popolo forportis sian paston, antaŭ
ol ĝi fermentis; iliaj pastujoj, ligitaj en iliaj vestoj,
estis sur iliaj ŝultroj. 35 Kaj la Izraelidoj faris, kiel diris
Moseo; kaj ili petis de la Egiptoj vazojn arĝentajn kaj
vazojn orajn kaj vestojn. 36 Kaj la Eternulo favorigis al
la popolo la Egiptojn, kaj ĉi tiuj pruntedonis al ili; kaj
ili multe prenis de la Egiptoj. 37 Kaj la Izraelidoj ekiris
el Rameses al Sukot, en la nombro de ĉirkaŭ sescent
mil piedirantaj viroj, krom la infanoj. 38 Kaj ankaŭ
granda amaso da diversgentaj homoj eliris kun ili,
kaj da ŝafoj kaj bovoj tre granda brutaro. 39 Kaj el la
pasto, kiun ili elportis el Egiptujo, ili bakis macajn
platpanojn, ĉar ĝi ankoraŭ ne fermentis; ĉar ili estis
elpelitaj el Egiptujo kaj ne povis prokrasti, kaj ili eĉ
ne pretigis al si manĝaĵon. 40 La daŭro de la tempo,
kiun la Izraelidoj loĝis en Egiptujo, estis kvarcent
tridek jaroj. 41 Kiam finiĝis kvarcent tridek jaroj,
ĝuste en la sama tago, ĉiuj taĉmentoj de la Eternulo
eliris el la lando Egipta. 42 Ĝi estas nokto dediĉata al
la Eternulo, ĉar Li elkondukis ilin el la lando Egipta; ĝi
estas tiu nokto, kiu estas dediĉata al la Eternulo de
ĉiuj Izraelidoj en iliaj generacioj. 43 Kaj la Eternulo
diris al Moseo kaj Aaron: Ĉi tio estas la leĝo pri la
Pasko: neniu fremdulo manĝu ĝin. 44 Sed ĉiu sklavo,
kiun iu aĉetis per mono, se vi cirkumcidis lin, tiam li
povas manĝi ĝin. 45 Pasloĝanto kaj dungito ne manĝu
ĝin. 46 En unu domo ĝi estu manĝata; ne elportu el la
domo iom el la viando eksteren, kaj oston en ĝi ne
rompu. 47 La tuta komunumo de Izrael faru ĝin. 48 Kaj
se enloĝiĝos ĉe vi aligentulo kaj li volos fari Paskon al
la Eternulo, tiam cirkumcidu ĉe li ĉiujn virseksulojn,
kaj tiam li povas prepari sin, por fari ĝin, kaj li estos
kiel indiĝeno de la lando; sed neniu ne cirkumcidita
manĝu ĝin. 49 La sama leĝo estu por la indiĝeno, kaj

por la aligentulo, kiu enloĝiĝis inter vi. 50 Kaj ĉiuj
Izraelidoj faris, kiel ordonis la Eternulo al Moseo kaj
al Aaron; tiel ili faris. 51 En tiu sama tago la Eternulo
elkondukis la Izraelidojn el la lando Egipta laŭ iliaj
taĉmentoj.

**13** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2
Dediĉu al Mi ĉiun unuenaskiton, kiu malfermas
ĉiun uteron inter la Izraelidoj, el la homo kaj el
la brutoj: al Mi li apartenas. 3 Kaj Moseo diris al
la popolo: Memoru ĉi tiun tagon, en kiu vi eliris
el Egiptujo, el la domo de sklaveco; ĉar per forta
mano la Eternulo elkondukis vin el tie; kaj ne manĝu
fermentaĵon. 4 Hodiaŭ vi eliras, en la monato Abib.
5 Kaj kiam la Eternulo venigos vin en la landon de
la Kanaanidoj kaj la Ĥetidoj kaj la Amoridoj kaj la
Ĥividoj kaj la Jebusidoj, pri kiu Li ĵuris al viaj patroj,
ke Li donos al vi, en la landon, en kiu fluas lakto kaj
mielo, tiam servu ĉi tiun servon en ĉi tiu monato. 6
Dum sep tagoj manĝu macojn, kaj en la sepa tago estu
festo de la Eternulo. 7 Macoj estu manĝataj dum la sep
tagoj, kaj ne vidiĝu ĉe vi fermentaĵo kaj ne vidiĝu ĉe vi
fermentinta pasto, en la tuta regiono, kiu apartenas al
vi. 8 Kaj sciigu al via filo en tiu tago, dirante: Ĝi estas
pro tio, kion la Eternulo faris al mi ĉe mia elirado el
Egiptujo. 9 Kaj tio estu ĉe vi kiel signo sur via mano
kaj kiel memorigaĵo inter viaj okuloj, por ke la instruo
de la Eternulo estu en via buŝo; ĉar per forta mano la
Eternulo elkondukis vin el Egiptujo. 10 Plenumu ĉi
tiun leĝon en ĝia tempo en ĉiu jaro. 11 Kaj kiam la
Eternulo venigos vin en la landon de la Kanaanidoj,
kiel Li ĵuris al vi kaj al viaj patroj, kaj donos ĝin
al vi, 12 tiam transdonadu ĉiun utermalferminton
al la Eternulo, kaj ĉiun unuenaskiton el la brutoj,
virseksulon, al la Eternulo. 13 Kaj ĉiun unuenaskiton el
la azenoj elaĉetu per ŝafido; kaj se vi ne elaĉetos, tiam
rompu al ĝi la kolon; kaj ĉiun homan unuenaskiton
inter viaj filoj elaĉetu. 14 Kaj kiam via filo morgaŭ vin
demandos, dirante: Kio tio estas? tiam diru al li: Per
forta mano la Eternulo elkondukis nin el Egiptujo,
el la domo de sklaveco; 15 kaj kiam Faraono obstine
rifuzis forliberigi nin, tiam la Eternulo mortigis ĉiun
unuenaskiton en la lando Egipta, de la unuenaskito de
homo ĝis la unuenaskito de bruto; tial mi oferas al la
Eternulo ĉiun utermalfermintan virseksulon, kaj ĉiun
unuenaskiton el miaj filoj mi elaĉetas. 16 Kaj tio estu
kiel signo sur via mano kaj kiel memorigaĵo inter viaj
okuloj; ĉar per forta mano la Eternulo elkondukis nin
el Egiptujo. 17 Kiam Faraono forliberigis la popolon,
Dio ne irigis ilin per la vojo de la lando Filiŝta, kiu
estis proksima; ĉar Dio diris: Eble la popolo pentos,
kiam ĝi ekvidos militon, kaj ĝi reiros Egiptujon. 18 Kaj
Dio kondukis la popolon ĉirkaŭire, per la vojo tra la
dezerto, al la Ruĝa Maro. Kaj armitaj la Izraelidoj eliris
el la lando Egipta. 19 Kaj Moseo prenis kun si la ostojn
de Jozef, ĉar tiu ĵurigis la Izraelidojn, dirante: Kiam
Dio rememoros vin, tiam elportu miajn ostojn el ĉi tie
kun vi. 20 Kaj ili elmoviĝis el Sukot, kaj starigis sian
tendaron en Etam, en la fino de la dezerto. 21 Kaj la
Eternulo iradis antaŭ ili dum la tago en nuba kolono,
por konduki ilin laŭ la ĝusta vojo, kaj dum la nokto
en kolono fajra, por lumi al ili, ke ili povu iri tage
kaj nokte. 22 Ne foriĝadis de antaŭ la popolo la nuba
kolono dum la tago nek la fajra kolono dum la nokto.

**14** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2
Diru al la Izraelidoj, ke ili iru returne, kaj starigu
sian tendaron antaŭ Pi-Haĥirot, inter Migdol kaj la
maro, apud Baal-Cefon; tie ili stariĝu tendare super
la maro. 3 Faraono diros pri la Izraelidoj: Ili perdis
la vojon en la lando, la dezerto ilin ŝlosis. 4 Kaj Mi
obstinigos la koron de Faraono, kaj li kuros post ili;
kaj Mi gloriĝos per Faraono kaj per lia tuta militistaro,
kaj la Egiptoj sciiĝos, ke Mi estas la Eternulo. Kaj
ili faris tiel. 5 Kiam oni diris al la reĝo de Egiptujo,
ke la popolo forkuris, tiam la koro de Faraono kaj
de liaj servantoj turniĝis kontraŭ la popolon, kaj ili
diris: Kion ni faris, forliberiginte la Izraelidojn de
servado al ni? 6 Kaj li jungis sian ĉaron kaj prenis kun
si sian popolon. 7 Kaj li prenis sescent plej bonajn
ĉarojn kaj ĉiujn ĉarojn de Egiptujo kaj la ĉefojn de la
tuta militistaro. 8 Kaj la Eternulo obstinigis la koron
de Faraono, la reĝo de Egiptujo, kaj li postkuris la
Izraelidojn; sed la Izraelidojn elirigis mano alta. 9
La Egiptoj postkuris ilin, kaj ĉiuj ĉevaloj kaj ĉaroj de
Faraono kaj liaj rajdantoj kaj lia militistaro atingis ilin,
kiam ili staris tendare super la maro, apud Pi-Haĥirot
antaŭ Baal-Cefon. 10 Kiam Faraono alproksimiĝis, tiam
la Izraelidoj levis siajn okulojn, kaj ekvidis, ke jen la
Egiptoj iras post ili; kaj ili tre ektimis, kaj la Izraelidoj
ekkriis al la Eternulo. 11 Kaj ili diris al Moseo: Ĉu
ne ekzistis tomboj en Egiptujo, ke vi prenis nin, por
morti en la dezerto? kion vi faris al ni, elkondukinte
nin el Egiptujo? 12 Tion ni diris ja al vi en Egiptujo:

Lasu nin, kaj ni servu la Egiptojn; ĉar pli bone estus
por ni servi la Egiptojn, ol morti en la dezerto. 13
Tiam Moseo diris al la popolo: Ne timu; staru, kaj vidu
la savon de la Eternulo, kiun Li faros al vi hodiaŭ; ĉar
la Egiptojn, kiujn vi vidas hodiaŭ, vi eterne neniam
plu vidos. 14 La Eternulo militos por vi, kaj vi silentu.
15 Kaj la Eternulo diris al Moseo: Kion vi krias al Mi?
diru al la Izraelidoj, ke ili ekiru. 16 Kaj vi levu vian
bastonon kaj etendu vian manon super la maron kaj
disfendu ĝin, por ke la Izraelidoj iru tra la mezo de la
maro sur seka tero. 17 Kaj jen, Mi obstinigos la korojn
de la Egiptoj, kaj ili iros post vi; kaj Mi gloriĝos per
Faraono kaj per lia tuta militistaro, per liaj ĉaroj kaj
liaj rajdantoj. 18 Kaj la Egiptoj sciiĝos, ke Mi estas
la Eternulo, kiam Mi gloriĝos per Faraono, per liaj
ĉaroj kaj liaj rajdantoj. 19 Kaj la Dia anĝelo, kiu iradis
antaŭ la tendaro de la Izraelidoj, formoviĝis kaj ekiris
post ili; kaj la nuba kolono formoviĝis de antaŭ ili kaj
stariĝis post ili; 20 kaj ĝi aperis inter la tendaro de la
Egiptoj kaj la tendaro de la Izraelidoj, kaj ĝi estis nubo
malluma, kaj lumis dum la nokto tiamaniere, ke unuj
al la aliaj ne povis alproksimiĝi dum la tuta nokto. 21
Kaj Moseo etendis sian manon super la maron; kaj la
Eternulo pelis la maron per forta orienta vento dum
la tuta nokto kaj faris la maron seka tero; kaj la akvo
disfendiĝis. 22 Kaj la Izraelidoj ekiris tra la mezo de
la maro sur seka tero, kaj la akvo estis por ili muro
dekstre kaj maldekstre. 23 Kaj la Egiptoj postkuris
kaj venis post ili, ĉiuj ĉevaloj de Faraono, liaj ĉaroj
kaj liaj rajdantoj, en la mezon de la maro. 24 Kiam
venis la matena gardotempo, la Eternulo ekrigardis
la tendaron de la Egiptoj el la fajra kaj nuba kolono,
kaj Li tumultigis la tendaron de la Egiptoj. 25 Kaj Li
depuŝis la radojn de iliaj ĉaroj kaj malrapidigis ilian
iradon. Tiam la Egiptoj diris: Ni forkuru for de la
Izraelidoj, ĉar la Eternulo militas por ili kontraŭ la
Egiptoj. 26 Kaj la Eternulo diris al Moseo: Etendu vian
manon super la maron, por ke la akvo revenu sur la
Egiptojn, sur iliajn ĉarojn kaj iliajn rajdantojn. 27 Kaj
Moseo etendis sian manon super la maron, kaj la maro
revenis en la komenco de la mateno, sur sian lokon,
kaj la Egiptoj kuris renkonte al ĝi. Kaj la Eternulo ĵetis
la Egiptojn en la mezon de la maro. 28 Kaj la akvo
revenis, kaj kovris la ĉarojn kaj la rajdantojn de la tuta
militistaro de Faraono, kiu venis post ili en la maron;
ne restis el ili eĉ unu. 29 Sed la Izraelidoj iris sur seka
tero tra la mezo de la maro, kaj la akvo estis por ili
muro dekstre kaj maldekstre. 30 Kaj la Eternulo savis
en tiu tago la Izraelidojn el la mano de la Egiptoj; kaj
la Izraelidoj vidis la Egiptojn mortintaj sur la bordo de
la maro. 31 Kaj la Izraelidoj vidis la grandan manon,
kiun la Eternulo aperigis sur la Egiptoj, kaj la popolo
ektimis la Eternulon kaj ekkredis al la Eternulo kaj al
Lia sklavo Moseo.

15 Tiam Moseo kaj la Izraelidoj kantis ĉi tiun kanton
al la Eternulo, kaj parolis jene: Mi kantos al la
Eternulo, ĉar Li alte leviĝis; Ĉevalon kaj ĝian rajdanton
Li ĵetis en la maron. 2 Mia forto kaj glorkanto estas la
Eternulo, Kaj Li estis por mi savo. Li estas mia Dio, kaj
mi Lin gloros, La Dio de mia patro, kaj mi Lin altigos.
3 La Eternulo estas viro de milito, Eternulo estas Lia
nomo. 4 La ĉarojn de Faraono kaj lian militistaron Li
ĵetis en la maron; Kaj liaj elektitaj militestroj dronis
en la Ruĝa Maro. 5 Abismoj ilin kovris; Ili falis en
la profundojn kiel ŝtono. 6 Via dekstra mano, ho
Eternulo, estas glora per forto, Via dekstra mano,
ho Eternulo, disbatas malamikon. 7 Per Via granda
majesto Vi frakasas Viajn kontraŭulojn; Vi sendas
Vian koleron, kaj ĝi forbruligas ilin kiel pajlon. 8 De
Via kolera blovo montiĝis akvo, Amasigite stariĝis
fluaĵo, Densiĝis abismoj en la mezo de la maro. 9 La
malamiko diris: Mi persekutos, Mi atingos, mi dividos
militakiron; Satiĝos de ili mia animo; Mi eltiros mian
glavon, ekstermos ilin mia mano. 10 Vi blovis per
Via spirito, kaj ilin kovris la maro; Kiel plumbo ili
iris al fundo en la akvo potenca. 11 Kiu estas kiel Vi
inter la dioj, ho Eternulo? Kiu estas kiel Vi, majesta
en sankteco, Timinda kaj laŭdinda, faranta miraklojn?
12 Vi etendis Vian dekstran manon, Kaj ilin englutis la
tero. 13 Vi kondukis kun Via favorkoreco tiun popolon,
kiun Vi liberigis; Vi kondukis ĝin per Via forto al Via
sankta loĝejo. 14 Aŭdis popoloj kaj ektremis; Teruro
atakis la loĝantojn de Filiŝtujo. 15 Tiam ektimis la
ĉefoj de Edom; La potenculojn de Moab atakis tremo;
Perdis la kuraĝon ĉiuj loĝantoj de Kanaan. 16 Falas sur
ilin timo kaj teruro pro la grandeco de Via brako; Ili
mutiĝas kiel ŝtono, ĝis pasas Via popolo, ho Eternulo,
Ĝis pasas la popolo, kiun Vi akiris. 17 Vi venigos
ilin, kaj plantos ilin Sur la monto de Via heredo, Sur
la loko, ho Eternulo, kiun Vi faris Via sidejo, En la
sanktejo, ho Sinjoro, kiun pretigis Viaj manoj. 18
La Eternulo reĝos ĉiam kaj eterne. 19 Ĉar la ĉevaloj
de Faraono kun liaj ĉaroj kaj rajdantoj eniĝis en la

maron, kaj la Eternulo turnis sur ilin la akvon de la
maro; sed la Izraelidoj iris sur seka tero tra la mezo
de la maro. 20 Mirjam, la profetino, fratino de Aaron,
prenis tamburinon en sian manon, kaj ĉiuj virinoj
eliris post ŝi kun tamburinoj kaj dancante. 21 Kaj
Mirjam antaŭkantis al ili: Kantu al la Eternulo, ĉar
Li alte leviĝis; Ĉevalon kaj ĝian rajdanton Li ĵetis en
la maron. 22 Moseo ekkondukis la Izraelidojn for de
la Ruĝa Maro, kaj ili eliris al la dezerto Ŝur; ili iris
dum tri tagoj tra la dezerto kaj ne trovis akvon. 23
Ili venis al Mara, sed ili ne povis trinki la akvon en
Mara, ĉar ĝi estis maldolĉa; tial oni donis al la loko la
nomon Mara. 24 Kaj la popolo ekmurmuris kontraŭ
Moseo, dirante: Kiam ni trinkos? 25 Tiam li kriis al la
Eternulo, kaj la Eternulo montris al li arbon, kaj li ĵetis
ĝin en la akvon, kaj la akvo fariĝis dolĉa. Tie Li donis
al ili leĝon kaj juĝon, kaj tie Li ilin elprovis. 26 Kaj Li
diris: Se vi aŭskultados la voĉon de la Eternulo, via
Dio, kaj farados tion, kio plaĉas al Li, kaj vi atentados
Liajn ordonojn kaj observados ĉiujn Liajn leĝojn, tiam
Mi venigos sur vin neniun el tiuj malsanoj, kiujn Mi
venigis sur la Egiptojn; ĉar Mi estas la Eternulo, via
saniganto. 27 Kaj ili venis al Elim; tie estis dek du
fontoj de akvo, kaj sepdek daktilpalmoj. Kaj ili starigis
tie sian tendaron ĉe la akvo.

**16** Ili elmoviĝis el Elim, kaj la tuta komunumo de la
Izraelidoj venis en la dezerton Sin, kiu troviĝas
inter Elim kaj Sinaj, en la dek-kvina tago de la dua
monato, post sia eliro el la lando Egipta. 2 Kaj la
tuta komunumo de la Izraelidoj ekmurmuris kontraŭ
Moseo kaj Aaron en la dezerto. 3 Kaj la Izraelidoj diris
al ili: Ho, ni dezirus morti per la mano de la Eternulo
en la lando Egipta, sidante super la potoj kun viando,
manĝante panon ĝissate! vi elkondukis nin en ĉi tiun
dezerton, por mortigi ĉi tiun tutan komunumon per
malsato. 4 Tiam la Eternulo diris al Moseo: Jen Mi
pluvigos por vi panon el la ĉielo; kaj la popolo eliru
kaj kolektu ĉiutage tiom, kiom ĝi bezonas por la tago,
por ke Mi esploru ĝin, ĉu ĝi sekvos Mian leĝon aŭ
ne. 5 Sed en la sesa tago ili preparu tion, kion ili
devas enporti, kaj tiam estos duobla porcio kompare
kun tio, kion ili kolektas ĉiutage. 6 Kaj Moseo kaj
Aaron diris al ĉiuj Izraelidoj: Vespere vi sciiĝos, ke
la Eternulo elkondukis vin el la lando Egipta. 7 Kaj
matene vi vidos la gloron de la Eternulo; ĉar Li aŭdis
vian murmuradon kontraŭ la Eternulo. Sed kio estas
ni, ke vi murmuras kontraŭ ni? 8 Kaj Moseo diris: La
Eternulo donos al vi vespere viandon por manĝi kaj
matene panon por satiĝi; ĉar la Eternulo aŭdis vian
murmuradon, kiun vi murmuris kontraŭ Li. Sed ni,
kio ni estas? ne kontraŭ ni estas via murmurado, sed
kontraŭ la Eternulo. 9 Kaj Moseo diris al Aaron: Diru
al la tuta komunumo de la Izraelidoj: Alproksimiĝu
antaŭ la Eternulon, ĉar Li aŭdis vian murmuradon. 10
Kaj dum Aaron estis parolanta al la tuta komunumo
de la Izraelidoj, ili turniĝis al la dezerto, kaj jen la
gloro de la Eternulo aperis en nubo. 11 Kaj la Eternulo
parolis al Moseo, dirante: 12 Mi aŭdis la murmuradon
de la Izraelidoj; diru al ili jenon: En la komenco de la
vespero vi manĝos viandon, kaj matene vi satiĝos per
pano, kaj vi sciiĝos, ke Mi estas la Eternulo, via Dio. 13
Kiam venis la vespero, alflugis koturnoj kaj kovris la
tendaron, kaj matene estis tavolo da roso ĉirkaŭ la
tendaro. 14 Kiam la tavolo da roso forleviĝis, tiam
montriĝis, ke sur la supraĵo de la dezerto kuŝas io
delikata, senŝela, delikata kiel prujno sur la tero. 15
Kiam la Izraelidoj ekvidis, ili diris unuj al la aliaj: Kio
ĝi estas? ĉar ili ne sciis, kio ĝi estas. Kaj Moseo diris
al ili: Ĝi estas la pano, kiun la Eternulo donis al vi
por manĝi. 16 Jen estas tio, kion ordonis la Eternulo:
Kolektu ĝin ĉiu en tia kvanto, kiom li bezonas por
manĝi; prenu po unu omero por ĉiu kapo, laŭ la
nombro de viaj animoj, kiujn ĉiu havas en sia tendo.
17 Kaj tiel faris la Izraelidoj, kaj ili kolektis, unu pli,
alia malpli. 18 Kaj oni mezuris per omero; kaj kiu
kolektis pli, ne havis superflue, kaj kiu kolektis malpli,
ne havis mankon; ĉiu kolektis tiom, kiom li povis
manĝi. 19 Kaj Moseo diris al ili: Neniu restigu iom
el ĝi ĝis la mateno. 20 Sed ili ne obeis Moseon, kaj
kelkaj restigis iom el ĝi ĝis la mateno; kaj aperis en ĝi
vermoj, kaj ĝi malbonodoriĝis; kaj Moseo ekkoleris
ilin. 21 Ili kolektadis ĝin ĉiumatene, ĉiu tiom, kiom li
bezonis por manĝi; kaj kiam la suno fariĝis pli varma,
tio fandiĝadis. 22 Kiam venis la sesa tago, ili kolektis
duoble da pano, po du omeroj por ĉiu; kaj ĉiuj ĉefoj
de la komunumo venis kaj diris tion al Moseo. 23 Kaj
li diris al ili: Jen estas, kion diris la Eternulo: ripozo
de sankta sabato de la Eternulo estas morgaŭ; kion
vi estas bakontaj, baku, kaj kion vi estas kuirontaj,
kuiru; sed ĉion superfluan formetu, por ke ĝi estu
konservata ĝis la mateno. 24 Kaj ili formetis ĝin ĝis la
mateno, kiel ordonis Moseo, kaj ĝi ne malbonodoriĝis,
kaj vermoj ne aperis en ĝi. 25 Kaj Moseo diris: Manĝu

ĝin hodiaŭ, ĉar hodiaŭ estas sabato de la Eternulo;
hodiaŭ vi ne trovos ĝin sur la kampo. **26** Dum ses
tagoj kolektu ĝin, sed la sepa tago estas sabato, en tiu
tago ĝi ne troviĝos. **27** En la sepa tago eliris kelkaj
el la popolo, por kolekti, sed ili ne trovis. **28** Kaj la
Eternulo diris al Moseo: Ĝis kiam vi rifuzos observi
Miajn ordonojn kaj Mian instruon? **29** Rigardu, la
Eternulo donis al vi la sabaton, tial Li donas al vi
en la sesa tago panon por du tagoj; restu ĉiu hejme,
neniu eliru for de sia loko en la sepa tago. **30** Kaj la
popolo ripozis en la sepa tago. **31** Kaj la domo de
Izrael donis al ĝi la nomon manao; ĝi estis kiel la
semo de koriandro, blanka, kaj ĝia gusto estis kiel
blankpaneto kun mielo. **32** Kaj Moseo diris: Jen estas
tio, kion ordonis la Eternulo: Plenigu per ĝi omeron,
ke ĝi estu konservata en viaj generacioj, por ke oni
vidu la panon, kiun Mi manĝigis al vi en la dezerto,
kiam Mi elkondukis vin el la lando Egipta. **33** Kaj
Moseo diris al Aaron: Prenu unu vazon kaj enmetu
tien plenan omeron da manao kaj starigu ĝin antaŭ la
Eternulo, por ke ĝi estu konservata en viaj generacioj.
**34** Kiel la Eternulo ordonis al Moseo, Aaron starigis
ĝin antaŭ la Atesto, por konserviĝi. **35** Kaj la Izraelidoj
manĝis la manaon dum kvardek jaroj, ĝis ili venis en
landon loĝeblan; la manaon ili manĝis, ĝis ili venis
al la limo de la lando Kanaana. **36** Kaj omero estas
dekono de efo.

**17** La tuta komunumo de la Izraelidoj elmoviĝis el
la dezerto Sin laŭ siaj tagvojoj, kiel ordonis la
Eternulo; kaj ili starigis sian tendaron en Refidim, kaj
la popolo ne havis akvon por trinki. **2** Kaj la popolo
malpacis kontraŭ Moseo, kaj ili diris: Donu al ni akvon
por trinki. Kaj Moseo diris al ili: Kial vi malpacas
kontraŭ mi? kial vi provas la Eternulon? **3** Sed la
popolo tie suferis pro manko de akvo, kaj la popolo
murmuris kontraŭ Moseo, kaj diris: Kial vi elkondukis
nin el Egiptujo, por mortigi nin kaj niajn infanojn
kaj niajn brutojn per soifo? **4** Tiam Moseo kriis al la
Eternulo, dirante: Kion mi faros kun ĉi tiu popolo?
baldaŭ povas okazi, ke ili min ŝtonmortigos. **5** Kaj la
Eternulo diris al Moseo: Preteriru antaŭ la popolo,
kaj prenu kun vi kelkajn el la ĉefoj de Izrael, kaj vian
bastonon, per kiu vi frapis la riveron, prenu en vian
manon, kaj iru. **6** Jen Mi staros antaŭ vi tie super
roko sur Ĥoreb; kaj vi frapos la rokon, kaj eliros el ĝi
akvo, kaj la popolo trinkos. Kaj Moseo faris tiel antaŭ
la okuloj de la ĉefoj de Izrael. **7** Kaj li donis al tiu
loko la nomon Masa kaj Meriba, pro la malpaco de
la Izraelidoj, kaj pro tio, ke ili provis la Eternulon,
dirante: Ĉu la Eternulo estas inter ni, aŭ ne? **8** Venis
la Amalekidoj, kaj ekmilitis kontraŭ la Izraelidoj en
Refidim. **9** Tiam Moseo diris al Josuo: Elektu al ni
virojn, kaj eliru, batalu kontraŭ la Amalekidoj. Morgaŭ
mi staros sur supro de monteto, kaj la Dian bastonon
mi havos en mia mano. **10** Kaj Josuo faris, kiel diris
al li Moseo, kaj batalis kontraŭ la Amalekidoj; kaj
Moseo, Aaron, kaj Ĥur supreniris sur la supron de la
monteto. **11** Kaj ĉiufoje, kiam Moseo levis sian manon,
venkis Izrael; kaj kiam li mallevis sian manon, venkis
Amalek. **12** Sed la manoj de Moseo estis pezaj; tial ili
prenis ŝtonon kaj metis ĝin sub lin, kaj li sidiĝis sur ĝi;
kaj Aaron kaj Ĥur subtenis liajn manojn, unu de unu
flanko, la dua de la dua flanko; kaj liaj manoj estis
en ĝusta teniĝo ĝis la subiro de la suno. **13** Kaj Josuo
senfortigis Amalekon kaj lian popolon per la glavo.
**14** Kaj la Eternulo diris al Moseo: Skribu ĉi tion por
memoro en libron kaj enmetu ĉi tion en la orelojn
de Josuo, ke Mi ekstermos la memoron pri Amalek
sub la ĉielo. **15** Moseo konstruis altaron, kaj donis al
ĝi la nomon: La Eternulo mia Standardo. **16** Ĉar li
diris: Estas promesite per la altaro de la Eternulo, ke
la Eternulo militos kontraŭ Amalek de generacio al
generacio.

**18** Jitro, la Midjana pastro, la bopatro de Moseo,
aŭdis ĉion, kion la Eternulo faris al Moseo kaj al
Sia popolo Izrael, ke la Eternulo elkondukis Izraelon
el Egiptujo. **2** Kaj Jitro, la bopatro de Moseo, prenis
Ciporan, la edzinon de Moseo, kiun tiu forlasis; **3** kaj
ŝiajn du filojn, el kiuj unu havis la nomon Gerŝom; ĉar
la patro diris: Mi estis fremdulo en fremda lando; **4** kaj
la dua havis la nomon Eliezer, ĉar tiu diris: La Dio de
mia patro helpis min, kaj savis min kontraŭ la glavo
de Faraono. **5** Kaj Jitro, la bopatro de Moseo, kun liaj
filoj kaj lia edzino venis al Moseo en la dezerton, kie li
staris tendare ĉe la monto de Dio. **6** Kaj li dirigis al
Moseo: Mi, via bopatro Jitro, venas al vi, kaj ankaŭ
via edzino kaj ŝiaj du filoj kun ŝi. **7** Tiam Moseo eliris
renkonte al sia bopatro kaj profunde salutis lin kaj
kisis lin, kaj ili demandis sin reciproke pri la farto
kaj eniris en la tendon. **8** Kaj Moseo rakontis al sia
bopatro ĉion, kion la Eternulo faris al Faraono kaj al
la Egiptoj pro Izrael, kaj ĉiujn malfacilaĵojn, kiuj trafis

ilin dum la vojo kaj el kiuj la Eternulo ilin savis. 9 Jitro
ĝojis je la tuta bono, kiun la Eternulo faris al Izrael,
savinte lin el la mano de la Egiptoj. 10 Kaj Jitro diris:
Benata estu la Eternulo, kiu savis vin el la manoj de
la Egiptoj kaj el la mano de Faraono, kaj kiu savis la
popolon el sub la mano de la Egiptoj. 11 Nun mi scias,
ke la Eternulo estas pli granda ol ĉiuj dioj; ĝi estas pro
tio, ke tiuj malbonintencis kontraŭ ili. 12 Kaj Jitro,
la bopatro de Moseo, alportis al Dio bruloferon kaj
buĉoferojn; kaj Aaron kaj ĉiuj ĉefoj de Izrael venis, por
manĝi panon kun la bopatro de Moseo antaŭ Dio. 13
La sekvantan tagon Moseo sidiĝis, por juĝi la popolon;
kaj la popolo staris antaŭ Moseo de la mateno ĝis
la vespero. 14 Kaj la bopatro de Moseo vidis ĉion,
kion li faras por la popolo, kaj diris: Kio estas tio,
kion vi faras al la popolo? kial vi sola sidas kaj la
tuta popolo staras antaŭ vi de mateno ĝis vespero?
15 Tiam Moseo diris al sia bopatro: La popolo venas
al mi, por demandi Dion. 16 Kiam fariĝas inter ili ia
afero, ili venas al mi; kaj mi juĝas inter unu kaj alia,
kaj mi sciigas la leĝojn de Dio kaj Liajn instruojn. 17
Sed la bopatro de Moseo diris al li: Ne bona estas la
afero, kiun vi faras. 18 Senfortiĝos vi kaj ĉi tiu popolo,
kiu estas kun vi; ĉar la afero estas tro malfacila por
vi; vi ne povas plenumi ĝin sola. 19 Aŭskultu mian
voĉon, mi donos al vi konsilon, kaj Dio estos kun vi. Vi
estu por la popolo perulo antaŭ Dio, kaj prezentu la
aferojn al Dio. 20 Instruu al ili la leĝojn kaj instruojn,
kaj montru al ili la vojon, kiun ili devas iri, kaj la
farojn, kiujn ili devas fari. 21 Kaj vi elserĉu inter la
tuta popolo homojn bravajn, timantajn Dion, homojn
veramajn, neprofitamajn; kaj starigu ilin super la
popolo kiel milestrojn, centestrojn, kvindekestrojn,
kaj dekestrojn. 22 Kaj ili juĝadu la popolon en ĉiu
tempo; ĉiun grandan aferon ili venigu al vi, sed ĉiun
malgrandan aferon juĝu ili; tiel fariĝos pli facile al vi,
kaj ili portos kun vi. 23 Se vi tion faros kaj Dio al vi
ordonos, tiam vi povos resti forta, kaj ankaŭ ĉi tiu
tuta popolo venos al sia loko en paco. 24 Moseo obeis
la voĉon de sia bopatro, kaj faris ĉion, kion tiu diris.
25 Kaj Moseo elektis bravajn homojn inter la tuta
Izrael, kaj faris ilin estroj super la popolo, milestroj,
centestroj, kvindekestroj, kaj dekestroj. 26 Kaj ili
juĝadis la popolon en ĉiu tempo; malfacilan aferon
ili venigadis al Moseo, kaj ĉiun aferon malgrandan
juĝadis ili. 27 Kaj Moseo lasis sian bopatron foriri, kaj
tiu iris en sian landon.

19 En la tria monato post la eliro de la Izraelidoj
el la lando Egipta, en tiu tago ili venis en la
dezerton Sinaj. 2 Ili eliris el Refidim, kaj venis en la
dezerton Sinaj kaj starigis sian tendaron en la dezerto;
kaj Izrael stariĝis tie tendare antaŭ la monto. 3 Kaj
Moseo supreniris al Dio; kaj la Eternulo vokis al li de
la monto, dirante: Tiel diru al la domo de Jakob kaj
sciigu al la filoj de Izrael: 4 Vi vidis, kion Mi faris al
la Egiptoj kaj kiel Mi portis vin sur aglaj flugiloj kaj
venigis vin al Mi. 5 Kaj nun se vi obeos Mian voĉon kaj
observos Mian interligon, vi estos Mia amata propraĵo
inter ĉiuj popoloj, ĉar al Mi apartenas la tuta tero. 6
Kaj vi estos por Mi regno de pastroj kaj popolo sankta.
Tio estas la vortoj, kiujn vi diru al la Izraelidoj. 7
Moseo venis, kaj alvokis la ĉefojn de la popolo, kaj
prezentis al ili ĉiujn tiujn vortojn, pri kiuj la Eternulo
ordonis al li. 8 Kaj la tuta popolo respondis kune
kaj diris: Ĉion, kion la Eternulo diris, ni faros. Kaj
Moseo raportis la vortojn de la popolo al la Eternulo.
9 Kaj la Eternulo diris al Moseo: Jen Mi venos al vi en
densa nubo, por ke la popolo aŭdu, kiam Mi parolos
kun vi, kaj por ke ili kredu al vi eterne. Kaj Moseo
sciigis la vortojn de la popolo al la Eternulo. 10 Kaj la
Eternulo diris al Moseo: Iru al la popolo kaj sanktigu
ĝin hodiaŭ kaj morgaŭ, kaj ili lavu siajn vestojn. 11
Kaj ili estu pretaj por la tria tago, ĉar en la tria tago
la Eternulo malsupreniros antaŭ la okuloj de la tuta
popolo sur la monton Sinaj. 12 Kaj difinu limon por la
popolo ĉirkaŭe, dirante: Gardu vin, ke vi ne supreniru
sur la monton nek tuŝu ĝian bazon; ĉiu, kiu tuŝos la
monton, estu mortigita. 13 Mano lin ne tuŝu, sed per
ŝtonoj li estu mortigita, aŭ li estu pafmortigita; ĉu
tio estos bruto, ĉu tio estos homo, li ne vivu. Kiam
eksonos longa trumpetado, tiam ili povas supreniri
sur la monton. 14 Kaj Moseo malsupreniris de la
monto al la popolo kaj sanktigis la popolon, kaj ili
lavis siajn vestojn. 15 Kaj li diris al la popolo: Estu
pretaj por la tria tago; ne alproksimiĝu al virino.
16 En la tria tago, tuj matene, komenciĝis tondroj
kaj fulmoj, kaj densa nubo estis super la monto, kaj
aŭdiĝis tre forta sonado de korno; kaj ektremis la tuta
popolo, kiu estis en la tendaro. 17 Kaj Moseo eligis la
popolon el la tendaro renkonte al Dio, kaj ili stariĝis
antaŭ la bazo de la monto. 18 Kaj la monto Sinaj tuta
fumiĝis kaŭze de tio, ke la Eternulo malsupreniris
sur ĝin en fajro; kaj ĝia fumo leviĝadis kiel fumo el
forno, kaj la tuta monto forte tremis. 19 Kaj la sonado

de la korno fariĝadis ĉiam pli kaj pli forta; Moseo
paroladis, kaj Dio respondadis al li per voĉo. 20 Kaj la
Eternulo malsupreniris sur la monton Sinaj, sur la
supron de la monto; kaj la Eternulo vokis Moseon sur
la supron de la monto, kaj Moseo supreniris. 21 Kaj
la Eternulo diris al Moseo: Iru malsupren, avertu la
popolon, ke ili ne translimiĝu perforte al la Eternulo,
por vidi, ĉar tiam multaj el ili falus. 22 Eĉ la pastroj,
kiuj alproksimiĝos al la Eternulo, sanktigu sin, por ke
la Eternulo ne frakasu ilin. 23 Kaj Moseo diris al la
Eternulo: La popolo ne povas supreniri sur la monton
Sinaj, ĉar Vi avertis nin, dirante: Faru limon ĉirkaŭ la
monto, kaj sanktigu ĝin. 24 Sed la Eternulo diris al li:
Iru malsupren, poste supreniru vi kaj Aaron kun vi;
sed la pastroj kaj la popolo ne penu perforte supreniri
al la Eternulo, por ke Li ne frakasu ilin. 25 Kaj Moseo
malsupreniris al la popolo kaj diris tion al ili.

**20** Kaj Dio diris ĉiujn sekvantajn vortojn: 2 Mi estas
la Eternulo, via Dio, kiu elkondukis vin el la lando
Egipta, el la domo de sklaveco. 3 Ne ekzistu ĉe vi aliaj
dioj antaŭ Mi. 4 Ne faru al vi idolon, nek bildon de io,
kio estas en la ĉielo supre aŭ sur la tero malsupre aŭ
en la akvo sub la tero; 5 ne kliniĝu antaŭ ili kaj ne
servu ilin; ĉar Mi, la Eternulo, via Dio, estas Dio severa,
kiu la malbonagon de la patroj punas sur la idoj en la
tria kaj kvara generacioj ĉe Miaj malamantoj, 6 kaj
kiu faras favorkoraĵon por miloj al Miaj amantoj kaj al
la plenumantoj de Miaj ordonoj. 7 Ne malbonuzu la
nomon de la Eternulo, via Dio; ĉar la Eternulo ne lasos
senpuna tiun, kiu malbonuzas Lian nomon. 8 Memoru
pri la tago sabata, ke vi tenu ĝin sankta. 9 Dum ses
tagoj laboru kaj faru ĉiujn viajn aferojn; 10 sed la
sepa tago estas sabato de la Eternulo, via Dio; faru
nenian laboron, nek vi, nek via filo, nek via filino, nek
via sklavo, nek via sklavino, nek via bruto, nek via
fremdulo, kiu estas inter viaj pordegoj; 11 ĉar dum ses
tagoj la Eternulo kreis la ĉielon kaj la teron, la maron,
kaj ĉion, kio estas en ili, sed en la sepa tago Li ripozis.
Tial la Eternulo benis la tagon sabatan kaj sanktigis
ĝin. 12 Respektu vian patron kaj vian patrinon, por ke
longe daŭru via vivo sur la tero, kiun la Eternulo, via
Dio, donas al vi. 13 Ne mortigu. 14 Ne adultu. 15 Ne
ŝtelu. 16 Ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran
ateston. 17 Ne deziru la domon de via proksimulo; ne
deziru la edzinon de via proksimulo, nek lian sklavon,
nek lian sklavinon, nek lian bovon, nek lian azenon,
nek ion, kio apartenas al via proksimulo. 18 Kaj la
tuta popolo vidis la tondrojn kaj la fulmojn kaj la
sonadon de la korno kaj la fumiĝadon de la monto;
kaj la popolo vidis, kaj retiriĝis kun teruro kaj stariĝis
malproksime. 19 Kaj ili diris al Moseo: Parolu vi kun
ni, kaj ni aŭskultos, sed Dio ne parolu kun ni, por ke
ni ne mortu. 20 Kaj Moseo diris al la popolo: Ne timu;
ĉar por vin elprovi venis Dio, kaj por ke la timo antaŭ
Li estu antaŭ via vizaĝo, por ke vi ne peku. 21 Kaj la
popolo staris malproksime; sed Moseo alproksimiĝis
al la mallumo, kie estis Dio. 22 Kaj la Eternulo diris
al Moseo: Tiel diru al la Izraelidoj: Vi vidis, kiel Mi
parolis kun vi el la ĉielo. 23 Ne faru antaŭ Mi diojn
arĝentajn, kaj diojn orajn ne faru al vi. 24 Altaron el
tero faru al Mi, kaj oferu sur ĝi viajn bruloferojn kaj
pacoferojn, viajn ŝafojn kaj viajn bovojn; sur ĉiu loko,
kie Mi memorigos Mian nomon, Mi venos al vi kaj
benos vin. 25 Kaj se vi faros al Mi altaron el ŝtonoj, ne
konstruu ĝin el ŝtonoj hakitaj; ĉar se vi levos sur ĝin
vian hakilon, vi ĝin malsanktigos. 26 Kaj ne supreniru
per ŝtupoj al Mia altaro, por ke ne malkovriĝu via
nudeco antaŭ ĝi.

**21** Kaj jen estas la juĝoj, kiujn vi proponos al ili:
2 Se vi aĉetos sklavon Hebreon, li servu dum ses
jaroj; sed en la sepa li eliru libera senpage. 3 Se li
venis sola, li eliru sola; se li estas edzigita, tiam lia
edzino eliru kune kun li. 4 Se lia sinjoro donis al li
edzinon kaj ŝi naskis al li filojn aŭ filinojn, tiam la
edzino kaj ŝiaj infanoj restu ĉe sia sinjoro, kaj li eliru
sola. 5 Sed se la sklavo diros: Mi amas mian sinjoron,
mian edzinon, kaj miajn infanojn, mi ne volas liberiĝi;
6 tiam lia sinjoro alkonduku lin antaŭ la potenculojn
kaj starigu lin apud la pordo aŭ apud la fosto, kaj
lia sinjoro trapiku lian orelon per aleno, kaj li estu
lia sklavo por ĉiam. 7 Kaj se iu vendos sian filinon
kiel sklavinon, ŝi ne eliru kiel eliras la sklavoj. 8 Se
ŝi ne plaĉas al sia sinjoro, al kiu ŝi estis fordonita,
tiam li donu al ŝi la eblon elaĉetiĝi; al fremda popolo
ŝin vendi li ne havas la rajton, ĉar li kondutis ne
honeste kontraŭ ŝi. 9 Se iu transdonos ŝin al sia filo,
li agu kun ŝi laŭ la rajto de filinoj. 10 Se li prenos
por li alian edzinon, tiam nutraĵo, vestoj, kaj edzina
vivo ne devas esti rifuzataj al ŝi. 11 Kaj se tiujn tri
aferojn li ne faros por ŝi, tiam ŝi eliru senpage, sen
elaĉeto. 12 Se iu batos homon kaj tiu mortos, li estu
mortigita. 13 Sed se li ne agis malbonintence, nur

Dio puŝis tiun sub lian manon, Mi difinas al vi lokon,
kien li povas forkuri. 14 Sed se iu intence mortigis
sian proksimulon per ruzo, tiam eĉ de Mia altaro
forprenu lin, ke li mortu. 15 Kiu batas sian patron aŭ
sian patrinon, tiu devas esti mortigita. 16 Kaj se iu
ŝtelas homon por vendi lin, aŭ oni trovas tiun en lia
mano, li devas esti mortigita. 17 Kiu malbenas sian
patron aŭ sian patrinon, tiu devas esti mortigita. 18
Se homoj kverelos, kaj unu batos la alian per ŝtono
aŭ per pugno kaj tiu ne mortos, sed devos kuŝi en
lito: 19 se li leviĝos kaj irados ekstere per apogilo,
tiam la batinto estu senkulpa; li nur kompensu al
li lian malliberigitecon kaj zorgu pri lia kuracado.
20 Se iu batos sian sklavon aŭ sian sklavinon per
bastono, kaj tiu mortos sub lia mano, tiam oni devas
lin puni; 21 sed se tiu restos viva dum unu aŭ du tagoj,
tiam oni ne devas lin puni; ĉar tio estas lia mono. 22
Se viroj kverelos kaj frapos gravedan virinon, kaj ŝi
abortos, sed ne fariĝos malfeliĉo, tiam oni punu lin
per monpuno, kian metos sur lin la edzo de la virino,
kaj li pagu ĝin laŭ decido de juĝantoj. 23 Sed se fariĝos
malfeliĉo, tiam donu animon pro animo, 24 okulon pro
okulo, denton pro dento, manon pro mano, piedon
pro piedo, 25 bruldifekton pro bruldifekto, vundon
pro vundo, kontuzon pro kontuzo. 26 Kaj se iu batos
okulon de sia sklavo aŭ de sia sklavino kaj difektos
ĝin, tiam li forliberigu tiun kompense pro la okulo.
27 Kaj se li elbatos denton de sia sklavo aŭ denton
de sia sklavino, li forliberigu tiun kompense pro la
dento. 28 Se bovo kornobatos viron aŭ virinon kaj
tiu mortos, tiam oni ŝtonmortigu la bovon kaj ĝia
viando ne estu manĝata, sed la mastro de la bovo
restu senkulpa. 29 Sed se la bovo estis kornobatema
antaŭe kaj oni tion sciigis al ĝia mastro kaj li ĝin
ne gardis kaj ĝi mortigis viron aŭ virinon, tiam la
bovon oni ŝtonmortigu kaj ĝian mastron oni mortigu.
30 Se oni metos sur lin elaĉeton, tiam li donu pro
sia animo tian elaĉetan sumon, kia estos metita sur
lin. 31 Se filo aŭ filino estos kornobatita, oni agu
kun li en la sama maniero. 32 Se iun sklavon aŭ
sklavinon kornobatos la bovo, tiam tridek sikloj da
mono devas esti pagitaj al ties mastro kaj la bovo
devas esti ŝtonmortigita. 33 Se iu malfermos kavon, aŭ
elfosos kavon, kaj ne kovros ĝin, kaj falos tien bovo aŭ
azeno, 34 tiam la mastro de la kavo devas kompensi
per mono al ĝia mastro, kaj la kadavro apartenu al
li. 35 Se la bovo de iu homo kornobatos bovon de lia
proksimulo tiel, ke ĝi mortos, tiam ili vendu la vivan
bovon kaj dividu inter si egalparte la monon pro ĝi,
kaj ankaŭ la kadavron ili dividu. 36 Sed se oni sciis,
ke la bovo estis kornobatema antaŭe, kaj ĝia mastro
ĝin ne gardis, tiam ili pagu bovon pro la bovo, kaj la
kadavro apartenu al li.

**22** Se iu ŝtelos bovon aŭ ŝafon kaj buĉos ĝin aŭ
vendos ĝin, tiam li pagu kvin bovojn pro la bovo
kaj kvar ŝafojn pro la ŝafo. 2 Se iu trovos ŝtelanton
ĉe subfosado kaj batos lin kaj tiu mortos, tiam oni
ne juĝu lin pro la sango. 3 Sed se lumis super li la
suno, tiam oni juĝu lin pro la sango. La ŝtelinto pagu
kompenson; se li ne havas, tiam oni lin vendu pro lia
ŝtelo. 4 Se la ŝtelitaĵo, ĉu ĝi estas bovo, ĉu azeno, ĉu
ŝafo, estos trovita en liaj manoj viva, tiam li kompensu
duoble. 5 Se iu difektos kampon aŭ vinberejon, lasante
sian bruton, ke ĝi difektu kampon de aliulo, tiam
li devas pagi per plejbonaĵo el sia kampo kaj per
plejbonaĵo el sia vinberejo. 6 Se eliros fajro kaj trafos
dornojn kaj ekstermos garbojn aŭ starantan grenon
aŭ kampon, tiam tiu kompensu, kiu kaŭzis la brulon. 7
Se iu donos al sia proksimulo monon aŭ uzataĵojn, por
konservi, kaj ili estos ŝtelitaj el la domo de tiu homo,
tiam, se la ŝtelinto estos trovita, li kompensu duoble.
8 Se la ŝtelinto ne estos trovita, tiam la mastro de la
domo venu al la potenculoj, kaj ĵuru, ke li ne etendis
sian manon sur la apartenaĵon de sia proksimulo. 9
Pri ĉiu maljustaĵo, ĉu ĝi estos pri bovo, ĉu pri azeno,
ĉu pri ŝafo, ĉu pri vesto, pri ĉiu perditaĵo, pri kiu iu
diros, ke ĝi estas lia, la afero de ambaŭ devas esti
prezentita al la potenculoj; kiun la potenculoj trovos
kulpa, tiu kompensu duoble al sia proksimulo. 10 Se iu
donos al sia proksimulo azenon aŭ bovon aŭ ŝafon
aŭ alian bruton, por konservi, kaj ĝi mortos aŭ estos
difektita aŭ forkaptita, kaj neniu tion vidos, 11 tiam
ĵuro antaŭ la Eternulo estu inter ili, ke li ne etendis
sian manon sur la apartenaĵon de sia proksimulo,
kaj ĝia mastro ĝin prenos kaj li ne kompensos. 12
Sed se oni ĝin ŝtelos de li, tiam li devas kompensi
al ĝia mastro. 13 Se ĝi estos disŝirita, li prezentu
ateston, kaj la disŝiritaĵon li ne kompensos. 14 Se
iu ĝin prenos prunte de sia proksimulo, kaj ĝi estos
difektita aŭ mortos dum foresto de sia mastro, tiam li
devas kompensi. 15 Se ĝia mastro estis apud ĝi, tiam
li ne devas kompensi. Se ĝi estis dungita, li perdis
sian dungomonon. 16 Se iu forlogos virgulinon, kiu

ne estas fianĉinigita, kaj kuŝos kun ŝi, tiam li donu
al ŝi doton kaj prenu ŝin al si kiel edzinon. 17 Se
ŝia patro ne volos doni ŝin al li, tiam li pagu tiom
da mono, kiom virgulinoj ordinare ricevas dote. 18
Sorĉistinon ne lasu vivi. 19 Ĉiu, kiu kuŝis kun bruto,
estu mortigita. 20 Kiu alportas oferojn al dioj, krom al
la Eternulo sole, tiu estu ekstermita. 21 Fremdulon ne
ofendu, nek premu lin; ĉar fremduloj vi estis en la
lando Egipta. 22 Vidvinon kaj orfon ne premu. 23 Se
vi ilin premos kaj ili krios al Mi, tiam Mi aŭdos ilian
krion; 24 kaj ekflamos Mia kolero, kaj Mi mortigos
vin per glavo, kaj viaj edzinoj estos vidvinoj kaj viaj
infanoj estos orfoj. 25 Se vi pruntedonos monon al iu
el Mia popolo, al iu malriĉulo apud vi, ne estu por li
premanto, ne metu sur lin procentojn. 26 Se vi prenos
de via proksimulo veston kiel garantiaĵon, tiam antaŭ
la subiro de la suno redonu ĝin al li; 27 ĉar ĝi estas lia
sola kovro, ĝi estas la vesto por lia korpo; en kio li
dormos? kaj kiam li krios al Mi, Mi aŭdos, ĉar Mi estas
favorkora. 28 Potenculojn ne malbenu, kaj estron de
via popolo ne insultu. 29 Vian abundon kaj sukon ne
retenu; la unuenaskiton el viaj filoj vi devas doni al
Mi. 30 Tiel same agu kun via bovo kaj via ŝafo; sep
tagojn ĝi restu kun sia patrino, en la oka tago donu
ĝin al Mi. 31 Estu por Mi sanktaj homoj; kaj viandon,
disŝiritan sur la kampo, ne manĝu; al hundo ĵetu ĝin.

**23** Ne disvastigu malveran famon; ne kunigu vian
manon kun malvirtulo, por esti atestanto de
malbonago. 2 Ne sekvu la amason por malbonaĵoj;
kaj en juĝo ne kliniĝu al la opinio de la plimulto, por
dekliniĝi de la vero. 3 Ankaŭ malriĉulon ne favoru
en lia juĝa afero. 4 Se vi renkontos bovon de via
malamiko aŭ lian azenon erarvagantan, rekonduku
ĝin al li. 5 Se vi vidos, ke azeno de via malamiko
falis sub sia ŝarĝo, ne forlasu ĝin, sed alportu helpon
kune kun li. 6 Ne forklinu la rajton de via malriĉulo
en lia juĝa afero. 7 De mensogaĵo malproksimiĝu,
kaj senkulpulon kaj virtulon ne mortigu; ĉar Mi ne
pravigos maljustulon. 8 Donacojn ne akceptu; ĉar
donacoj blindigas vidantojn kaj malĝustigas la aferojn
de virtuloj. 9 Fremdulon ne premu; vi konas ja la
animon de fremdulo, ĉar fremduloj vi estis en la lando
Egipta. 10 Dum ses jaroj prisemu vian teron kaj rikoltu
ĝiajn produktaĵojn; 11 sed en la sepa jaro ripozigu
ĝin kaj ne tuŝu ĝin, por ke manĝu la malriĉuloj el via
popolo, kaj la restaĵon manĝu la bestoj de la kampo.
Tiel same agu kun via vinberejo kaj kun via olivarbejo.
12 Dum ses tagoj faru viajn laborojn, kaj en la sepa
tago festu, por ke ripozu via bovo kaj via azeno kaj
por ke refreŝiĝu la filo de via sklavino kaj la fremdulo.
13 Kaj ĉion, kion Mi diris al vi, observu; kaj la nomon
de aliaj dioj ne citu, ĝi ne estu aŭdata el via buŝo. 14
Tri fojojn festu al Mi dum la jaro. 15 La feston de la
macoj observu; dum sep tagoj manĝu macojn, kiel
Mi ordonis al vi, en la difinita tempo en la monato
Abib (ĉar en tiu tempo vi eliris el Egiptujo); kaj oni
ne aperu antaŭ Mi kun malplenaj manoj; 16 ankaŭ la
feston de la rikolto de la unuaj fruktoj de via laboro,
de tio, kion vi semos sur la kampo; kaj la feston de
kolekto en la fino de la jaro, kiam vi kolektos viajn
laborfruktojn el la kampo. 17 Tri fojojn ĉiujare aperu
ĉiuj viaj virseksuloj antaŭ la Sinjoro, la Eternulo. 18
Ne verŝu sur fermentaĵon la sangon de Mia ofero; kaj
la graso de Mia festofero ne restu ĝis mateno. 19 La
komencaĵon de la unuaj fruktoj de via tero alportu en
la domon de la Eternulo, via Dio. Ne kuiru kapridon
en la lakto de ĝia patrino. 20 Jen Mi sendas anĝelon
antaŭ vi, por gardi vin sur la vojo, kaj por venigi vin
al la loko, kiun Mi pretigis. 21 Gardu vin antaŭ lia
vizaĝo kaj aŭskultu lian voĉon; ne incitu lin, ĉar li ne
pardonos vian pekon; ĉar Mia nomo estas en li. 22
Sed se vi aŭskultos lian voĉon, kaj faros ĉion, kion Mi
diros, tiam Mi malamikos kontraŭ viaj malamikoj kaj
premos viajn premantojn. 23 Kiam Mia anĝelo iros
antaŭ vi, kaj Mi venigos vin al la Amoridoj, la Ĥetidoj,
la Perizidoj, la Kanaanidoj, la Ĥividoj, kaj la Jebusidoj,
kaj Mi ilin ekstermos: 24 ne adoru iliajn diojn kaj ne
servu ilin, kaj ne agu kiel ili agas, sed frakasu ilin kaj
detruu iliajn statuojn. 25 Kaj servu la Eternulon, vian
Dion, kaj Li benos vian panon kaj vian akvon; kaj Mi
forigos malsanon el via mezo. 26 Ne estos seninfana
nek sennaska en via lando; la nombron de viaj tagoj
Mi faros plena. 27 Mian teruron Mi sendos antaŭ vi,
kaj Mi konfuzos ĉiun popolon, al kiu vi venos, kaj
ĉiujn viajn malamikojn Mi turnos al vi dorse. 28 Kaj Mi
sendos krabrojn antaŭ vi, kaj ili forpelos la Ĥividojn
kaj la Kanaanidojn kaj la Ĥetidojn de antaŭ vi. 29 Mi
ne forpelos ilin de antaŭ vi en unu jaro, por ke la tero
ne fariĝu senhoma kaj por ke ne multiĝu kontraŭ vi la
bestoj de la kampo. 30 Iom post iom Mi forpelos ilin
de antaŭ vi, ĝis vi multiĝos kaj posedos la landon.
31 Kaj Mi faros viajn limojn de la Ruĝa Maro ĝis la
Maro Filiŝta, kaj de la dezerto ĝis la Rivero; ĉar Mi

transdonos en viajn manojn la loĝantojn de la lando,
kaj vi forpelos ilin de antaŭ vi. 32 Ne faru interligon
kun ili nek kun iliaj dioj. 33 Ili ne loĝu en via lando,
por ke ili ne pekigu vin kontraŭ Mi; se vi servos iliajn
diojn, tio fariĝos kaptilo por vi.

**24** Kaj al Moseo Li diris: Supreniru al la Eternulo,
vi kaj Aaron, Nadab kaj Abihu, kaj sepdek el la
ĉefoj de Izrael, kaj faru adoron de malproksime. 2
Kaj Moseo sola alproksimiĝu al la Eternulo; sed ili ne
alproksimiĝu, kaj la popolo ne supreniru kun li. 3 Kaj
Moseo venis kaj rakontis al la popolo ĉiujn vortojn
de la Eternulo kaj ĉiujn leĝojn. Kaj la tuta popolo
respondis per unu voĉo, kaj ili diris: Ĉion, kion diris la
Eternulo, ni faros. 4 Kaj Moseo skribis ĉiujn vortojn
de la Eternulo, kaj li leviĝis frue matene kaj konstruis
altaron sub la monto kaj dek du kolonojn laŭ la dek du
triboj de Izrael. 5 Kaj li sendis junulojn el la Izraelidoj,
kaj ili alportis bruloferojn kaj buĉis pacoferojn al
la Eternulo, bovidojn. 6 Moseo prenis duonon de
la sango kaj enverŝis en pelvojn, kaj duonon de la
sango li ŝprucigis sur la altaron. 7 Kaj li prenis la
libron de la interligo kaj laŭtlegis ĝin al la popolo,
kaj ili diris: Ĉion, kion diris la Eternulo, ni faros kaj
obeos. 8 Kaj Moseo prenis la sangon kaj ŝprucigis sur
la popolon, kaj diris: Jen estas sango de la interligo,
kiun la Eternulo faris kun vi pri ĉiuj tiuj vortoj. 9
Kaj supreniris Moseo kaj Aaron, Nadab kaj Abihu, kaj
sepdek el la ĉefoj de Izrael. 10 Kaj ili vidis la Dion
de Izrael; kaj sub Liaj piedoj estis io, kiel faritaĵo el
brilanta safiro, kaj kiel la ĉielo mem, kiam ĝi estas
klara. 11 Li ne etendis Sian manon kontraŭ la ĉefojn
de Izrael; kaj ili vidis Dion, kaj manĝis kaj trinkis. 12
Kaj la Eternulo diris al Moseo: Supreniru al Mi sur
la monton kaj estu tie; kaj Mi donos al vi ŝtonajn
tabelojn, kaj la instruon kaj ordonojn, kiujn Mi skribis,
por instrui ilin. 13 Kaj leviĝis Moseo kaj lia servanto
Josuo, kaj Moseo supreniris sur la monton de Dio.
14 Kaj al la ĉefoj li diris: Restu ĉi tie, ĝis ni revenos
al vi; kaj jen Aaron kaj Ĥur estas kun vi; kiu havas
ian aferon, tiu venu al ili. 15 Kaj Moseo supreniris
sur la monton, kaj nubo kovris la monton. 16 Kaj
la majesto de la Eternulo loĝis sur la monto Sinaj,
kaj la nubo ĝin kovris dum ses tagoj; kaj Li vokis
Moseon en la sepa tago el interne de la nubo. 17 Kaj la
aspekto de la majesto de la Eternulo estis kiel fajro
flamanta sur la supro de la monto antaŭ la okuloj de
la Izraelidoj. 18 Kaj Moseo eniris en la mezon de la
nubo, kaj supreniris sur la monton; kaj Moseo estis
sur la monto dum kvardek tagoj kaj kvardek noktoj.

**25** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2 Diru
al la Izraelidoj, ke ili alportu por Mi oferdonon; de
ĉiu homo, kies koro deziros doni, prenu la oferdonon
por Mi. 3 Kaj jen estas la oferdono, kiun vi prenos
de ili: oro kaj arĝento kaj kupro, 4 kaj blua teksaĵo
kaj purpura kaj ruĝa, kaj bisino kaj kapra lano, 5 kaj
virŝafaj feloj ruĝe kolorigitaj kaj antilopaj feloj, kaj
akacia ligno, 6 oleo por lumigado, aromaĵoj por la
sankta oleo kaj por la bonodoraj incensoj, 7 ŝtonoj
oniksaj kaj ŝtonoj enkadrigeblaj por la efodo kaj por
la surbrustaĵo. 8 Kaj ili faru por Mi sanktejon, por ke
Mi loĝu inter ili. 9 Laŭ ĉio, kiel Mi montros al vi la
bildon de la Loĝejo kaj la bildon de ĉiuj ĝiaj objektoj,
tiel faru. 10 Kaj ili faru keston el akacia ligno; du ulnoj
kaj duono estu ĝia longo, kaj unu ulno kaj duono ĝia
larĝo, kaj unu ulno kaj duono ĝia alto. 11 Kaj tegu
ĝin per pura oro, interne kaj ekstere tegu ĝin, kaj
faru sur ĝi oran kronon ĉirkaŭe. 12 Kaj fandu por ĝi
kvar orajn ringojn, kaj alfortikigu ilin sur ĝiaj kvar
anguloj: du ringojn sur unu ĝia flanko kaj du ringojn
sur ĝia alia flanko. 13 Kaj faru stangojn el akacia
ligno kaj tegu ilin per oro. 14 Kaj metu la stangojn
en la ringojn sur la flankoj de la kesto, por porti la
keston per ili. 15 En la ringoj de la kesto devas esti
la stangoj; ili ne estu prenataj for de ĝi. 16 Kaj en la
keston enmetu la Ateston, kiun Mi donos al vi. 17
Kaj faru fermoplaton el pura oro; du ulnoj kaj duono
estu ĝia longo, kaj unu ulno kaj duono ĝia larĝo. 18
Kaj faru du kerubojn el oro; per forĝa laboro faru
ilin ĉe la du randoj de la fermoplato. 19 Faru unu
kerubon ĉe unu flanko kaj unu kerubon ĉe la alia
flanko; elstarantaj el la fermoplato faru la kerubojn,
sur ĝiaj du flankoj. 20 Kaj la keruboj estu etendantaj
siajn flugilojn supren, kovrante per siaj flugiloj la
fermoplaton, kaj iliaj vizaĝoj estu unu kontraŭ la alia;
al la fermoplato estu turnitaj la vizaĝoj de la keruboj.
21 Kaj metu la fermoplaton sur la keston supre, kaj en
la keston metu la ateston, kiun Mi donos al vi. 22 Kaj
Mi aperados al vi tie, kaj Mi parolados kun vi super la
fermoplato, el inter la du keruboj, kiuj estos super
la kesto de atesto, pri ĉio, kion Mi ordonos al vi por
la Izraelidoj. 23 Kaj faru tablon el akacia ligno; du
ulnoj estu ĝia longo, kaj unu ulno ĝia larĝo, kaj unu

ulno kaj duono ĝia alto. **24** Kaj tegu ĝin per pura oro,
kaj faru al ĝi oran kronon ĉirkaŭe. **25** Kaj faru ĉirkaŭ
ĝi manlarĝan listelon, kaj faru oran kronon ĉirkaŭ
la listelo. **26** Kaj faru por ĝi kvar orajn ringojn, kaj
alfortikigu la ringojn en la kvar anguloj, ĉe ĝiaj kvar
piedoj. **27** Apud la listelo estu la ringoj, kiel ingoj por
stangoj, por porti la tablon. **28** Kaj faru la stangojn el
akacia ligno, kaj tegu ilin per oro, ke per ili oni portu
la tablon. **29** Kaj faru ĝiajn pladojn kaj ĝiajn kulerojn,
kaj ĝiajn kalikojn kaj ĝiajn kruĉojn, per kiuj oni verŝos;
el pura oro faru ilin. **30** Kaj metu sur la tablon panon
de propono antaŭ Mi ĉiam. **31** Kaj faru kandelabron el
pura oro, per forĝa laboro estu farita la kandelabro;
ĝia trunko kaj ĝiaj branĉoj, ĝiaj kalikoj, ĝiaj kapetoj,
kaj ĝiaj floroj elstaru el ĝi. **32** Kaj ses branĉoj devas
elstari el ĝiaj flankoj: tri branĉoj de la kandelabro el
unu flanko, kaj tri branĉoj de la kandelabro el la alia
flanko; **33** tri migdalformaj kalikoj, kapeto, kaj floro,
sur unu branĉo, kaj tri migdalformaj kalikoj, kapeto,
kaj floro, sur la alia branĉo; tiel sur la ses branĉoj, kiuj
elstaras el la kandelabro. **34** Kaj sur la kandelabro estu
kvar migdalformaj kalikoj kun kapetoj kaj floroj. **35**
Kaj kapeto sub unu paro da branĉoj, kapeto sub la dua
paro da branĉoj, kaj kapeto sub la tria paro da branĉoj;
tiel por la ses branĉoj, kiuj elstaras el la kandelabro.
**36** La kapetoj kaj branĉoj devas elstari el ĝi; ĉio devas
esti unu forĝita tutaĵo el pura oro. **37** Kaj faru por ĝi
sep lucernojn; kaj starigu sur ĝi ĝiajn lucernojn, ke ili
lumu sur ĝian antaŭan flankon. **38** Kaj ĝiaj preniloj kaj
cindrujoj estu el pura oro. **39** El kikaro da pura oro oni
faru ĝin kaj ĉiujn tiujn apartenaĵojn. **40** Kaj rigardu
kaj faru laŭ ilia modelo, kiu estis montrita al vi sur la
monto.

**26** La tabernaklon faru el dek tapiŝoj el tordita
bisino, kaj el blua, purpura, kaj ruĝa teksaĵo;
kerubojn artiste laboritajn faru sur ili. **2** La longo
de ĉiu tapiŝo estu dudek ok ulnoj, kaj la larĝo de
ĉiu tapiŝo estu kvar ulnoj; unu mezuro estu por ĉiuj
tapiŝoj. **3** Kvin tapiŝoj estu kunigitaj unu kun la alia,
kaj la kvin ceteraj tapiŝoj estu ankaŭ kunigitaj unu
kun la alia. **4** Kaj faru maŝojn el blua teksaĵo sur la
rando de unu tapiŝo, sur la rando de la kuniĝo, kaj
tiel same faru sur la rando de la ekstrema tapiŝo, sur
la dua rando de kuniĝo. **5** Kvindek maŝojn faru sur
unu tapiŝo, kaj kvindek maŝojn faru sur la rando de
tiu tapiŝo, sur kiu estas la dua flanko de la kuniĝo;
la maŝoj devas esti reciproke aranĝitaj unu kontraŭ
alia. **6** Kaj faru kvindek orajn hoketojn, kaj kunigu
la tapiŝojn unu kun la alia per la hoketoj, por ke la
tabernaklo fariĝu unu tutaĵo. **7** Kaj faru tapiŝojn el
kapra lano kiel kovron super la tabernaklo; dek unu
tiajn tapiŝojn faru. **8** La longo de ĉiu tapiŝo estu tridek
ulnoj, kaj la larĝo de ĉiu tapiŝo estu kvar ulnoj; unu
mezuro estu por la dek unu tapiŝoj. **9** Kaj kunigu kvin
tapiŝojn aparte kaj ses tapiŝojn aparte, kaj la sesan
tapiŝon faldu duige antaŭ la tabernaklo. **10** Kaj faru
kvindek maŝojn sur la rando de la ekstrema tapiŝo,
sur la rando de la kuniĝo, kaj kvindek maŝojn sur la
rando de la dua kuniĝa tapiŝo. **11** Kaj faru kvindek
kuprajn hoketojn, kaj metu la hoketojn en la maŝojn,
por ke vi kunigu la tendon kaj ĝi estu unu tutaĵo. **12**
Kaj el la superflua pendanta parto de la tapiŝoj de la
kovro, duono de la superflua tapiŝa parto superpendu
super la malantaŭa flanko de la tabernaklo. **13** Kaj po
unu ulno ĉiuflanke el la superflua longo de la tapiŝoj
superpendu super ambaŭ flankoj de la tabernaklo,
por kovri ĝin. **14** Kaj faru kovron por la tendo el
ruĝaj virŝafaj feloj kaj ankoraŭ kovron el antilopaj
feloj supre. **15** Kaj faru starantajn tabulojn por la
tabernaklo el akacia ligno. **16** Dek ulnoj estu la longo
de ĉiu tabulo, kaj unu ulno kaj duono la larĝo de ĉiu
tabulo. **17** Du pivotoj estu ĉe ĉiu tabulo, alĝustigitaj
unu al la alia; tiel faru ĉe ĉiuj tabuloj de la tabernaklo.
**18** Kaj faru la tabulojn por la tabernaklo: dudek tabuloj
staru sur la flanko suda. **19** Kaj kvardek arĝentajn
bazojn faru sub la dudek tabuloj: du bazojn sub ĉiu
tabulo, por ĝiaj du pivotoj. **20** Kaj sur la dua flanko
de la tabernaklo, sur la flanko norda, estu dudek
tabuloj, **21** kaj kvardek arĝentaj bazoj por ili, po du
bazoj sub ĉiu tabulo. **22** Kaj sur la malantaŭa flanko
de la tabernaklo, okcidente, faru ses tabulojn. **23** Kaj
du tabulojn faru en la anguloj de la tabernaklo sur
la malantaŭa flanko. **24** Ili estu kunigitaj malsupre
kaj kunigitaj supre per unu ringo; tiel ĝi estu kun ili
ambaŭ; por ambaŭ anguloj ili estu. **25** Tiel estu ok
tabuloj, kaj ĉe ili dek ses arĝentaj bazoj, po du bazoj
sub ĉiu tabulo. **26** Kaj faru riglilojn el akacia ligno,
kvin por la tabuloj de unu flanko de la tabernaklo,
**27** kaj kvin riglilojn por la tabuloj de la dua flanko
de la tabernaklo, kaj kvin riglilojn por la tabuloj de
la malantaŭa flanko de la tabernaklo, okcidente. **28**
Kaj la meza riglilo meze de la tabuloj ŝoviĝu de unu
fino ĝis la alia. **29** Kaj la tabulojn tegu per oro, kaj

iliajn ringojn, ingojn por la rigliloj, faru el oro, kaj la
riglilojn tegu per oro. 30 Starigu la tabernaklon laŭ ĝia
modelo, kiu estis montrita al vi sur la monto. 31 Kaj
faru kurtenon el blua, purpura, kaj ruĝa teksaĵo, kaj el
tordita bisino; artiste laboritaj keruboj estu faritaj sur
ĝi. 32 Kaj pendigu ĝin sur kvar akaciaj kolonoj, tegitaj
per oro kaj havantaj orajn hokojn kaj arĝentajn bazojn.
33 Kaj pendigu la kurtenon sub la hokoj, kaj enportu
tien internen de la kurteno la keston de atesto; kaj la
kurteno faru por vi apartigon inter la sanktejo kaj la
plejsanktejo. 34 Kaj metu la fermoplaton sur la keston
de atesto en la plejsanktejo. 35 Kaj starigu la tablon
ekster la kurteno, kaj la kandelabron kontraŭ la tablo,
en la suda parto de la tabernaklo; la tablon starigu en
la norda parto. 36 Kaj faru kovrotukon por la pordo
de la tabernaklo, el blua, purpura, kaj ruĝa teksaĵo,
kaj el tordita bisino, kun brodaĵoj; 37 kaj faru por la
kovrotuko kvin kolonojn el akacia ligno, kaj tegu ilin
per oro, kaj iliaj hoketoj estu el oro; kaj fandu por ili
kvin kuprajn bazojn.

**27** Kaj faru la altaron el akacia ligno, havantan la
longon de kvin ulnoj kaj la larĝon de kvin ulnoj;
kvarangula estu la altaro; kaj ĝia alto estu tri ulnoj.
2 Kaj faru ĝiajn kornojn sur ĝiaj kvar anguloj; el ĝi
elstaru ĝiaj kornoj; kaj tegu ĝin per kupro. 3 Kaj faru
por ĝi potojn por ĝia cindro kaj ŝovelilojn kaj kalikojn
kaj forkojn kaj karbujojn; ĉiujn ĝiajn vazojn faru el
kupro. 4 Kaj faru por ĝi kradon en formo de kupra
reto, kaj faru sur la reto kvar kuprajn ringojn sur ĝiaj
kvar anguloj. 5 Kaj metu ĝin sub la kornicon de la
altaro, malsupren, tiel, ke la reto atingu ĝis la mezo de
la altaro. 6 Kaj faru stangojn por la altaro, stangojn el
akacia ligno, kaj tegu ilin per kupro. 7 Kaj metu ĝiajn
stangojn en ringojn, tiel, ke la stangoj estu ĉe ambaŭ
flankoj de la altaro, kiam oni ĝin portos. 8 Interne
malplena faru ĝin el tabuloj; kiel estis montrite al vi
sur la monto, tiel oni faru. 9 Kaj faru korton por la
tabernaklo; sur la flanko suda estu kurtenoj por la
korto, el tordita bisino; unu flanko havu la longon de
cent ulnoj; 10 kaj ĝiaj dudek kolonoj kaj iliaj dudek
bazoj estu el kupro; la hokoj de la kolonoj kaj iliaj
ligiloj estu el arĝento. 11 Tiel same ankaŭ sur la norda
flanko laŭlonge estu kurtenoj, havantaj la longon
de cent ulnoj; kaj dudek kolonoj, kaj por ili dudek
bazoj el kupro; la hokoj de la kolonoj kaj iliaj ligiloj
estu el arĝento. 12 Sed laŭlarĝe de la korto, sur la
flanko okcidenta, estu kurtenoj, havantaj la longon de
kvindek ulnoj; dek kolonoj, kaj por ili dek bazoj. 13
Kaj laŭlarĝe de la korto, sur la flanko orienta, estu
kurtenoj, havantaj la longon de kvindek ulnoj. 14 Kaj
kurtenoj, havantaj la longon de dek kvin ulnoj, estu
por unu latero; ankaŭ tri kolonoj, kaj por ili tri bazoj.
15 Kaj por la dua latero estu kurtenoj, havantaj la
longon de dek kvin ulnoj; ankaŭ tri kolonoj, kaj por
ili tri bazoj. 16 Kaj por la pordego de la korto estu
kovrotuko, havanta la longon de dudek ulnoj, el blua,
purpura, kaj ruĝa teksaĵo, kaj el tordita bisino, kun
brodaĵoj; kvar kolonoj, kaj por ili kvar bazoj. 17 Ĉiuj
kolonoj ĉirkaŭ la korto havu ligilojn el arĝento, hokojn
el arĝento, kaj bazojn el kupro. 18 La longo de la korto
estu cent ulnoj, la larĝo ĉie kvindek, kaj la alto kvin
ulnoj; ĉio estu farita el tordita bisino, kaj la bazoj estu
el kupro. 19 Ĉiuj vazoj de la tabernaklo, por ĉiuj servoj,
kaj ĉiuj ĝiaj najloj kaj ĉiuj najloj de la korto, estu el
kupro. 20 Kaj vi ordonu al la Izraelidoj, ke ili alportu
al vi oleon olivan, puran, pistitan, por lumigado,
por ke lucerno brulu ĉiam. 21 En la tabernaklo de
kunveno, ekstere de la kurteno, kiu pendas antaŭ la
atesto, aranĝadu ĝin Aaron kaj liaj filoj de vespero ĝis
mateno antaŭ la Eternulo. Tio estu eterna leĝo en la
generacioj de la Izraelidoj.

**28** Kaj vi alproksimigu al vi vian fraton Aaron kaj
liajn filojn kun li el inter la Izraelidoj, por ke li
estu Mia pastro: Aaron, kaj Nadab, Abihu, Eleazar,
kaj Itamar, la filoj de Aaron. 2 Kaj faru sanktajn
vestojn por via frato Aaron, por honoro kaj ornamo.
3 Kaj diru al ĉiuj, kiuj havas saĝan koron kaj kiujn
Mi plenigis per spirito de saĝo, ke ili faru por Aaron
vestojn, por sanktigi lin, ke li estu Mia pastro. 4 Kaj
jen estas la vestoj, kiujn ili devas fari: surbrustaĵo,
efodo, tuniko, ĥitono teksita, cidaro, kaj zono. Kaj ili
faru sanktajn vestojn por via frato Aaron kaj por liaj
filoj, ke li estu Mia pastro. 5 Kaj ili prenu oron, kaj
bluan, purpuran, kaj ruĝan teksaĵon, kaj bisinon. 6
Kaj ili faru la efodon el oro, el blua, purpura, kaj ruĝa
teksaĵo, kaj el tordita bisino, en artista maniero. 7 Du
surŝultraĵojn kunigantajn ĝi havu sur siaj du finoj,
por ke ĝi estu ligita. 8 Kaj la ĉirkaŭliganta zono sur ĝi
estu la sama laboraĵo, kiel ĝia kontinuaĵo, el oro, el
blua, purpura, kaj ruĝa teksaĵo, kaj el tordita bisino. 9
Kaj prenu du oniksajn ŝtonojn, kaj gravuru sur ili la
nomojn de la filoj de Izrael: 10 ses el iliaj nomoj sur

unu ŝtono kaj la ses ceterajn nomojn sur la dua ŝtono,
laŭ la ordo de ilia naskiĝo. 11 Per laboro de gravuristoj,
kiel sigelila gravurado, gravurigu sur la du ŝtonoj
la nomojn de la filoj de Izrael; faru ilin ĉirkaŭataj
per kadretoj el oro. 12 Kaj metu la du ŝtonojn sur la
surŝultraĵojn de la efodo, kiel ŝtonojn de memoro pri
la filoj de Izrael; kaj Aaron portu iliajn nomojn antaŭ
la Eternulo sur siaj du surŝultraĵoj por memoro. 13
Kaj faru kadretojn el oro; 14 kaj du ĉenetojn el pura
oro; faru ilin kuniĝantaj per siaj finoj, plektitaj; kaj
alfortikigu la plektitajn ĉenetojn al la kadretoj. 15 Kaj
faru juĝan surbrustaĵon per artista laboro; simile al la
laboro de la efodo faru ĝin; el oro, el blua, purpura,
kaj ruĝa teksaĵo, kaj el tordita bisino faru ĝin. 16
Kvarangula ĝi estu kaj duobla; manstreĉo estu ĝia
longo, kaj manstreĉo ĝia larĝo. 17 Kaj enmetu en ĝin
enmetaĵon el ŝtonoj en kvar vicoj. La ŝtonoj de vico:
rubeno, topazo, kaj smeraldo estu la unua vico; 18 kaj
la dua vico: hiacinto, safiro, kaj jaspiso; 19 kaj la tria
vico: ligurio, agato, kaj ametisto; 20 kaj la kvara vico:
krizolito, kaj onikso, kaj berilo. En oraj kadretoj ili
estu laŭ siaj vicoj. 21 Kaj la ŝtonoj estu laŭ la nomoj de
la filoj de Izrael; dek du, laŭ iliaj nomoj, gravuritaj
sigelile, ĉiu kun sia nomo, por la dek du triboj. 22 Kaj
faru al la surbrustaĵo plektitajn ĉenetojn, kuniĝantajn
per siaj finoj, el pura oro. 23 Kaj faru por la surbrustaĵo
du orajn ringojn, kaj alfortikigu la du ringojn al la
du finoj de la surbrustaĵo. 24 Kaj metu la du orajn
plektitajn ĉenetojn en la du ringojn ĉe la finoj de
la surbrustaĵo. 25 Kaj la du finojn de la du plektitaj
ĉenetoj enfortikigu en la du kadretojn, kaj alfortikigu
ilin al la surŝultraĵoj de la efodo sur la antaŭa flanko.
26 Kaj faru du orajn ringojn, kaj alfortikigu ilin al la du
aliaj finoj de la surbrustaĵo, sur interna ĝia rando,
direktita al la efodo. 27 Kaj faru du orajn ringojn,
kaj alfortikigu ilin al la du surŝultraĵoj de la efodo
malsupre, sur la antaŭa flanko, ĉe ĝia kuniĝo, super
la zono de la efodo. 28 Kaj oni alligu la surbrustaĵon
per ĝiaj ringoj al la ringoj de la efodo per laĉo el blua
ŝtofo, por ke ĝi estu super la zono de la efodo kaj
por ke la surbrustaĵo ne forŝoviĝu de sur la efodo. 29
Kaj Aaron portu la nomojn de la filoj de Izrael sur
la juĝa surbrustaĵo sur sia koro, kiam li eniros en la
sanktejon, por ĉiama memoro antaŭ la Eternulo. 30
Kaj metu sur la juĝan surbrustaĵon la signojn de lumo
kaj la signojn de justo, por ke ili estu sur la koro de
Aaron, kiam li eniros antaŭ la Eternulon; kaj Aaron
ĉiam portu la juĝon de la filoj de Izrael sur sia koro
antaŭ la Eternulo. 31 Kaj faru la tunikon de la efodo
tutan el blua teksaĵo. 32 La aperturo por la kapo estu
en ĝia mezo; ĉirkaŭ la aperturo estu teksita bordero,
kiel ĉe aperturo de ŝildo, por ke ĝi ne disŝiriĝu. 33 Sur
ĝia malsupra rando faru granatojn el blua, purpura,
kaj ruĝa teksaĵo, ĉirkaŭe sur ĝia malsupra rando,
kaj inter ili ĉirkaŭe orajn tintilojn. 34 Ora tintilo kaj
granato, ora tintilo kaj granato estu ĉirkaŭe sur la
malsupra rando de la tuniko. 35 Ĝi estu sur Aaron
dum lia servado; por ke oni aŭdu sonon de li, kiam li
eniros en la sanktejon antaŭ la Eternulon kaj kiam li
eliros, kaj por ke li ne mortu. 36 Kaj faru tabuleton
el pura oro, kaj gravuru sur ĝi en sigelila maniero:
SANKTA AL LA ETERNULO. 37 Kaj alfortikigu ĝin per
laĉo el blua ŝtofo, ke ĝi estu sur la cidaro; sur la antaŭa
flanko de la cidaro ĝi devas esti. 38 Ĝi estu sur la
frunto de Aaron; kaj Aaron portados la pekon kontraŭ
la sanktaĵoj, kiujn sanktigos la Izraelidoj en ĉiuj siaj
sanktaj donoj; kaj ĝi estos sur lia frunto ĉiam, por
ke la Eternulo ilin favoru. 39 Kaj teksu la ĥitonon el
bisino, kaj faru la cidaron el bisino, kaj faru broditan
zonon. 40 Kaj por la filoj de Aaron faru ĥitonojn,
kaj faru por ili zonojn, kaj mitrojn faru por ili, por
honoro kaj ornamo. 41 Kaj vestu per ili vian fraton
Aaron kaj liajn filojn kune kun li; kaj sanktoleu ilin kaj
konsekru ilin kaj sanktigu ilin, por ke ili estu pastroj
al Mi. 42 Kaj faru por ili linajn pantalonojn, por kovri
la nudecon de ilia karno; de la lumbo ĝis la femuroj ili
estu. 43 Kaj ili estu sur Aaron kaj sur liaj filoj, kiam
ili eniros en la tabernaklon de kunveno, aŭ kiam ili
alproksimiĝos al la altaro, por servi en la sanktejo;
por ke ili ne faru pekon kaj ne mortu. Eterna leĝo ĝi
estu por li kaj por lia idaro post li.

**29** Kaj jen estas tio, kion vi devas fari al ili, por
sanktigi ilin, ke ili estu pastroj al Mi: prenu unu
virbovidon kaj du virŝafojn sendifektajn; 2 kaj macan
panon, kaj macajn kukojn, miksitajn kun oleo, kaj
macajn flanojn, ŝmiritajn per oleo; el delikata tritika
faruno faru ilin. 3 Kaj metu ilin en unu korbon, kaj
venigu ilin en la korbo, kaj ankaŭ la bovidon kaj la
du virŝafojn. 4 Kaj Aaronon kaj liajn filojn alvenigu
al la pordo de la tabernaklo de kunveno, kaj lavu
ilin per akvo. 5 Kaj prenu la vestojn, kaj metu sur
Aaronon la ĥitonon kaj la tunikon de la efodo kaj la
efodon kaj la surbrustaĵon, kaj zonu lin per la zono de

la efodo. 6 Kaj metu la cidaron sur lian kapon, kaj
metu la sanktan kronon sur la cidaron. 7 Kaj prenu la
oleon de sanktoleado, kaj verŝu sur lian kapon kaj
sanktoleu lin. 8 Kaj liajn filojn alvenigu, kaj vestu
ilin per la ĥitonoj. 9 Kaj zonu ilin per zono, Aaronon
kaj liajn filojn, kaj alligu sur ili mitrojn, por ke al ili
apartenu la pastreco laŭ eterna leĝo; kaj konsekru
Aaronon kaj liajn filojn. 10 Kaj alvenigu la bovidon
antaŭ la tabernaklon de kunveno, kaj Aaron kaj liaj
filoj metu siajn manojn sur la kapon de la bovido. 11
Kaj buĉu la bovidon antaŭ la Eternulo, ĉe la pordo de
la tabernaklo de kunveno. 12 Kaj prenu iom el la sango
de la bovido kaj metu per viaj fingroj sur la kornojn
de la altaro, kaj la tutan ceteran sangon elverŝu ĉe
la bazo de la altaro. 13 Kaj prenu la tutan sebon, kiu
kovras la internaĵon, kaj la reton de la hepato, kaj la
du renojn, kaj la sebon, kiu estas sur ili, kaj incense
bruligu ilin sur la altaro. 14 Kaj la karnon de la bovido
kaj ĝian felon kaj ĝian malpuraĵon forbruligu per
fajro ekster la tendaro; ĝi estas pekofero. 15 Kaj unu
virŝafon prenu, kaj Aaron kaj liaj filoj metu siajn
manojn sur la kapon de la virŝafo. 16 Kaj buĉu la
virŝafon, kaj prenu ĝian sangon kaj aspergu la altaron
ĉirkaŭe. 17 Kaj la virŝafon dishaku en partojn, kaj lavu
ĝian internaĵon kaj ĝiajn krurojn, kaj metu ilin sur
ĝiajn partojn kaj sur ĝian kapon. 18 Kaj forbruligu la
tutan virŝafon sur la altaro; ĝi estas brulofero por la
Eternulo; agrabla odoraĵo, fajrofero por la Eternulo ĝi
estas. 19 Kaj prenu la duan virŝafon, kaj Aaron kaj liaj
filoj metu siajn manojn sur la kapon de la virŝafo. 20
Kaj buĉu la virŝafon, kaj prenu iom el ĝia sango kaj
metu sur la malsupran randon de la dekstra orelo de
Aaron kaj sur la malsupran randon de la dekstra orelo
de liaj filoj kaj sur la dikan fingron de ilia dekstra
mano kaj sur la dikan fingron de ilia dekstra piedo; kaj
aspergu per la sango la altaron ĉirkaŭe. 21 Kaj prenu
el la sango, kiu estos sur la altaro, kaj sanktan oleon,
kaj aspergu Aaronon kaj liajn vestojn kaj liajn filojn
kaj la vestojn de liaj filoj kune kun li; kaj sanktiĝos
li kaj liaj vestoj kaj liaj filoj kaj la vestoj de liaj filoj
kune kun li. 22 Kaj prenu de la virŝafo la sebon kaj la
voston, kaj la sebon, kiu kovras la internaĵon, kaj la
reton de la hepato, kaj la du renojn, kaj la sebon, kiu
estas sur ili, kaj la dekstran femuron, ĉar tio estas
virŝafo de konsekrado; 23 kaj unu bulon da pano kaj
unu kukon kun oleo kaj unu flanon, el la korbo kun
macoj, kiu staras antaŭ la Eternulo; 24 kaj metu ĉion
sur la manojn de Aaron kaj sur la manojn de liaj filoj,
kaj skuu tion kiel skuoferon antaŭ la Eternulo. 25 Kaj
prenu tion el iliaj manoj, kaj forbruligu ĝin sur la
altaro kune kun la brulofero, kiel agrablan odoraĵon
antaŭ la Eternulo; ĝi estas fajrofero por la Eternulo. 26
Kaj prenu la brustaĵon de la virŝafo de konsekrado de
Aaron, kaj skuu ĝin kiel skuoferon antaŭ la Eternulo;
kaj tio estos via parto. 27 Kaj sanktigu la brustaĵon de
skuado kaj la femuron de levado, kiuj estis skuitaj
kaj levitaj el la virŝafo de konsekrado de Aaron kaj
de liaj filoj; 28 kaj tio estu por Aaron kaj por liaj
filoj porĉiama destinitaĵo de la Izraelidoj; ĉar ĝi estas
levofero, kaj levofero ĝi estu de la Izraelidoj, el iliaj
pacoferoj ilia levofero al la Eternulo. 29 Kaj la sanktaj
vestoj de Aaron estu por liaj filoj post li, por ke ili
estu sanktoleataj en ili kaj por ke ili estu konsekrataj
en ili. 30 Dum sep tagoj portu ilin sur si tiu el liaj
filoj, kiu estos pastro anstataŭ li, kaj kiu venos en la
tabernaklon de kunveno, por servi en la sanktejo. 31
Kaj la virŝafon de konsekrado prenu, kaj kuiru ĝian
viandon sur sankta loko. 32 Kaj Aaron kaj liaj filoj
manĝu la viandon de la virŝafo, kaj la panon, kiu estas
en la korbo, ĉe la pordo de la tabernaklo de kunveno.
33 Kaj ili tion manĝu, ĉar per tio ili puriĝis, por ke
ili estu konsekritaj kaj por ke ili estu sanktigitaj.
Laiko tion ne manĝu, ĉar tio estas sankta. 34 Se el
la viando de konsekrado kaj el la pano restos iom
ĝis la mateno, tiam forbruligu la restaĵon per fajro;
ĝi ne estu manĝata, ĉar ĝi estas sankta. 35 Kaj agu
kun Aaron kaj kun liaj filoj tiel, kiel Mi ĉion ordonis
al vi; dum sep tagoj konsekru ilin. 36 Kaj propekan
bovidon oferu ĉiutage por senpekiĝo; kaj senpekigu la
altaron, oferante sur ĝi, kaj oleu ĝin, por ĝin sanktigi.
37 Dum sep tagoj senpekigu la altaron kaj sanktigu
ĝin; kaj la altaro fariĝu plejsanktaĵo; ĉio, kio ektuŝos
la altaron, fariĝos sankta. 38 Jen tio, kion vi metos
sur la altaron: du jaraĝajn ŝafidojn ĉiutage, ĉiam; 39
unu ŝafidon oferu matene, kaj la duan ŝafidon oferu
ĉirkaŭ la vespero; 40 kaj por unu ŝafido dekonon de
efo da delikata faruno, miksita kun kvarono de hino
da elpistita oleo, kaj kvaronon de hino da vino por
verŝoferi. 41 La duan ŝafidon oferu ĉirkaŭ la vespero;
faru kun ĝi kiel kun la matena donofero kaj verŝofero,
ke ĝi estu agrabla odoraĵo, fajrofero por la Eternulo,
42 ĉiama brulofero en viaj generacioj ĉe la pordo de
la tabernaklo de kunveno antaŭ la Eternulo, kie Mi
aperados antaŭ vi, por paroli tie kun vi. 43 Kaj Mi

aperados tie antaŭ la Izraelidoj, kaj la loko sanktiĝos
per Mia gloro. 44 Kaj Mi sanktigos la tabernaklon de
kunveno kaj la altaron; kaj Aaronon kaj liajn filojn
Mi sanktigos, por ke ili estu Miaj pastroj. 45 Kaj Mi
loĝos inter la Izraelidoj, kaj Mi estos por ili Dio. 46 Kaj
ili sciu, ke Mi estas la Eternulo, ilia Dio, kiu elirigis
ilin el la lando Egipta, por ke Mi loĝu inter ili, Mi, la
Eternulo, ilia Dio.

**30** Kaj faru altaron, por fumigi incenson; el akacia
ligno faru ĝin. 2 Unu ulno estu ĝia longo, kaj unu
ulno ĝia larĝo; ĝi estu kvarangula; kaj du ulnoj estu
ĝia alto; kornoj elstaru el ĝi. 3 Kaj tegu ĝin per pura
oro, ĝian supran platon kaj ĝiajn flankojn ĉirkaŭe kaj
ĝiajn kornojn; kaj faru al ĝi oran kronon ĉirkaŭe. 4 Kaj
du orajn ringojn faru al ĝi sub ĝia krono, sur ĝiaj du
lateroj; sur du flankoj faru ilin; kaj ili estu ingoj por
stangoj, per kiuj oni portu ĝin. 5 Kaj faru la stangojn
el akacia ligno, kaj tegu ilin per oro. 6 Kaj starigu ĝin
antaŭ la kurteno, kiu estas antaŭ la kesto de atesto,
kontraŭ la fermoplato de la kesto de atesto, kie Mi
aperados al vi. 7 Kaj Aaron incensadu sur ĝi aroman
incenson; ĉiumatene, kiam li ordigos la lucernojn, li
incensu. 8 Kaj kiam Aaron ekbruligos la lucernojn
ĉirkaŭ vespero, li incensu; ĝi estu ĉiama incensado
antaŭ la Eternulo en viaj generacioj. 9 Ne alportu
sur ĝi incenson alian, nek bruloferon nek donoferon,
kaj verŝoferon ne verŝu sur ĝin. 10 Kaj ĉiopardonan
oferon Aaron alportos sur ĝiaj kornoj unu fojon en
la jaro; el la sango de la ĉiopardona pekofero unu
fojon en jaro li alportu sur ĝi ĉiopardonan oferon en
viaj generacioj; tio estos plej granda sanktaĵo antaŭ
la Eternulo. 11 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo,
dirante: 12 Kiam vi kalkulos la kapojn de la Izraelidoj,
tiam ĉiu donu liberigan pagon por sia animo al la
Eternulo, kiam ili estos kalkulataj; kaj tiam ne estos
inter ili epidemio dum la kalkulado. 13 Jen kion devas
doni ĉiu, kiu pasas la kalkulon: duonon de siklo laŭ
la grandeco de la sankta siklo (siklo enhavas dudek
gerojn); duono de siklo estu oferdono por la Eternulo.
14 Ĉiu, kiu pasas la kalkulon, de la aĝo de dudek
jaroj kaj pli, devas doni la oferdonon al la Eternulo.
15 La riĉulo ne donu pli kaj la malriĉulo ne donu
malpli ol duonon de siklo, donante la oferdonon
por la Eternulo, por liberigi viajn animojn. 16 Kaj
prenu la monon de la liberigo de la Izraelidoj kaj
uzu ĝin por la servado en la tabernaklo de kunveno,
kaj tio estos por la Izraelidoj kiel memorigaĵo antaŭ
la Eternulo, por liberigi viajn animojn. 17 Kaj la
Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 18 Faru kupran
lavujon kun kupra piedestalo, por lavado; kaj starigu
ĝin inter la tabernaklo de kunveno kaj la altaro, kaj
enverŝu tien akvon. 19 Kaj Aaron kaj liaj filoj lavu
per ĝi siajn manojn kaj piedojn: 20 kiam ili iros en la
tabernaklon de kunveno, ili lavu sin per akvo, por ke
ili ne mortu; aŭ kiam ili alproksimiĝos al la altaro,
por servi, por incensi fajroferon al la Eternulo, 21 ili
lavu siajn manojn kaj piedojn, por ke ili ne mortu;
kaj tio estu por ili leĝo eterna, por li kaj por lia idaro
en iliaj generacioj. 22 Plue la Eternulo ekparolis al
Moseo, dirante: 23 Prenu al vi plej bonajn aromaĵojn:
da bonodora mirho kvincent siklojn, kaj da aroma
cinamo duonon de tio, ducent kvindek, kaj da aroma
kano ducent kvindek, 24 kaj da kasio kvincent siklojn
laŭ la mezuro de la sankta siklo, kaj da olivoleo
unu hinon. 25 Kaj faru el tio oleon por sanktoleado,
kunmetitan ŝmiraĵon laŭ la arto de la ŝmiraĵisto; ĝi
estu oleo por sanktoleado. 26 Kaj sanktoleu per ĝi
la tabernaklon de kunveno kaj la keston de atesto,
27 kaj la tablon kaj ĉiujn ĝiajn apartenaĵojn, kaj la
kandelabron kaj ĝiajn apartenaĵojn, kaj la altaron de
incensado, 28 kaj la altaron de bruloferoj kaj ĉiujn
ĝiajn apartenaĵojn, kaj la lavujon kaj ĝian piedestalon.
29 Kaj sanktigu ilin, ke ili fariĝu plejsanktaĵo; ĉiu, kiu
ektuŝos ilin, sanktiĝos. 30 Kaj Aaronon kaj liajn filojn
sanktoleu, kaj sanktigu ilin, ke ili estu Miaj pastroj. 31
Kaj al la Izraelidoj diru jene: Tio estu por Mi oleo de
sanktoleado en viaj generacioj. 32 Sur homan karnon
ĝi ne estu verŝata, kaj laŭ ĝia konsisto ne faru ion
similan; ĝi estas sankta, ĝi estu sankta por vi. 33 Se
iu konsistigos ion similan kaj ŝmiros per ĝi laikon, li
ekstermiĝu el sia popolo. 34 Kaj la Eternulo diris al
Moseo: Prenu al vi aromaĵon: balzamon kaj stakton
kaj galbanon bonodoran kaj puran olibanon, po egalaj
partoj el ĉio; 35 kaj faru el tio incensaĵon kunmetitan
laŭ la arto de la ŝmiraĵisto, bone frotmiksitan, puran,
sanktan. 36 Kaj pistu el tio subtilan pulvoron, kaj metu
iom el ĝi antaŭ la keston de atesto en la tabernaklo
de kunveno, kie Mi aperados al vi; plejsanktaĵo ĝi
estu por vi. 37 Kaj laŭ la incensaĵo, kiun vi faros, ne
faru al vi alian similan; sankta ĝi estu al vi por la
Eternulo. 38 Se iu faros ion similan, por odorigi per ĝi,
li ekstermiĝos el sia popolo.

**31** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2
Jen, Mi vokis per la nomo Becalelon, filon de Uri,
filo de Ĥur, el la tribo de Jehuda; 3 kaj Mi plenigis
lin per Dia spirito, per saĝo kaj prudento kaj scio kaj
ĉia arto, 4 por pripensi ideojn, por labori el oro kaj
el arĝento kaj el kupro, 5 kaj por ĉizi ŝtonojn por
enkadrigo, kaj por ĉizi lignon, por fari ĉian laboron. 6
Kaj jen Mi donis al li kiel helpanton Oholiabon, filon
de Aĥisamaĥ, el la tribo de Dan; kaj en la koron de ĉiu
kompetentulo Mi enmetis saĝon, por ke ili faru ĉion,
kion Mi ordonis al vi: 7 la tabernaklon de kunveno
kaj la keston de atesto kaj la fermoplaton sur ĝi kaj
ĉiujn apartenaĵojn de la tabernaklo, 8 kaj la tablon kaj
ĝiajn apartenaĵojn kaj la puran kandelabron kaj ĉiujn
ĝiajn apartenaĵojn kaj la altaron de incensado, 9 kaj
la altaron de bruloferoj kaj ĉiujn ĝiajn apartenaĵojn
kaj la lavujon kaj ĝian piedestalon, 10 kaj la oficajn
vestojn kaj la sanktajn vestojn por la pastro Aaron
kaj la pastrajn vestojn de liaj filoj, 11 kaj la sanktan
oleon kaj la aroman incensaĵon por la sanktejo; ĉion
konforme al tio, kiel Mi ordonis al vi, ili faros. 12 Kaj
la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 13 Diru al la
Izraelidoj jene: Nepre observu Miajn sabatojn; ĉar tio
estas signo inter Mi kaj vi en viaj generacioj, por ke vi
sciu, ke Mi estas la Eternulo, kiu vin sanktigas. 14 Kaj
observu la sabaton, ĉar ĝi estas sankta por vi; kiu ĝin
malsanktigos, tiu mortu; ĉar se iu faros en ĝi laboron,
tiu animo ekstermiĝu el la mezo de sia popolo. 15
Dum ses tagoj oni faru laboron, sed la sepan tagon
estas sabato de ripozo, sankta por la Eternulo; ĉiu, kiu
faros laboron en la tago sabata, estu mortigita. 16 Kaj
la Izraelidoj observu la sabaton, por fari la sabaton
en siaj generacioj eterna interligo. 17 Inter Mi kaj la
Izraelidoj ĝi estu signo por ĉiam; ĉar dum ses tagoj la
Eternulo faris la ĉielon kaj la teron, sed en la sepa
tago Li ĉesis kaj ripozis. 18 Kaj, fininte paroli al li sur
la monto Sinaj, la Eternulo donis al Moseo du tabelojn
de atesto, tabelojn ŝtonajn, skribitajn per la fingro de
Dio.

**32** Kiam la popolo vidis, ke Moseo longe ne
malsuprenvenas de la monto, la popolo kolektiĝis
antaŭ Aaron, kaj diris al li: Leviĝu, faru al ni diojn, kiuj
irus antaŭ ni; ĉar pri tiu Moseo, la viro, kiu elkondukis
nin el la lando Egipta, ni ne scias, kio fariĝis kun li. 2
Tiam diris al ili Aaron: Elprenu la orajn orelringojn,
kiuj estas en la oreloj de viaj edzinoj, de viaj filoj,
kaj de viaj filinoj, kaj alportu al mi. 3 Kaj la tuta
popolo elprenis la orajn orelringojn, kiuj estis en iliaj
oreloj, kaj alportis al Aaron. 4 Kaj li prenis tion el iliaj
manoj kaj formis ĝin per ĉizilo kaj faris el ĝi fanditan
bovidon. Kaj ili diris: Jen estas viaj dioj, ho Izrael, kiuj
elirigis vin el la lando Egipta. 5 Kiam Aaron tion vidis,
li konstruis altaron antaŭ ĝi; kaj Aaron proklamis kaj
diris: Morgaŭ estos festo de la Eternulo. 6 Kaj ili leviĝis
frue la sekvantan tagon kaj oferis bruloferojn kaj
alportis pacoferojn; kaj la popolo sidiĝis, por manĝi
kaj trinki, kaj ili leviĝis, por ludi. 7 Tiam la Eternulo
diris al Moseo: Iru, iru malsupren; ĉar malvirtiĝis via
popolo, kiun vi elkondukis el la lando Egipta. 8 Rapide
ili forflankiĝis de la vojo, kiun Mi ordonis al ili; ili faris
al si fanditan bovidon kaj adorkliniĝis al ĝi kaj alportis
al ĝi oferojn, kaj diris: Jen estas viaj dioj, ho Izrael,
kiuj elirigis vin el la lando Egipta. 9 Kaj la Eternulo
diris al Moseo: Mi vidas ĉi tiun popolon, ĝi estas
popolo malmolnuka. 10 Lasu do Min, kaj ekflamos
Mia kolero kontraŭ ilin, kaj Mi ilin ekstermos, kaj Mi
faros vin granda popolo. 11 Sed Moseo ekpetegis la
Eternulon, sian Dion, kaj diris: Por kio, ho Eternulo,
Via kolero estas ekflamonta kontraŭ Vian popolon,
kiun Vi elirigis el la lando Egipta per granda forto
kaj per potenca mano? 12 Por kio la Egiptoj diru: Por
malbono Li elirigis ilin, por mortigi ilin en la montoj
kaj por ekstermi ilin de sur la tero? Forlasu Vian
flaman koleron kaj fordecidu la malbonon kontraŭ
Via popolo. 13 Rememoru Abrahamon, Isaakon, kaj
Izraelon, Viajn sklavojn, al kiuj Vi ĵuris per Vi, kaj al
kiuj Vi diris: Mi multigos vian semon kiel la steloj de
la ĉielo, kaj la tutan tiun landon, pri kiu Mi parolis,
Mi donos al viaj idoj, kaj ili posedos ĝin eterne. 14
Kaj la Eternulo fordecidis la malbonon, pri kiu Li
diris, ke Li faros ĝin al Sia popolo. 15 Moseo sin
returnis kaj malsupreniris de la monto, kaj la du
tabeloj de atesto estis en liaj manoj, tabeloj, sur kiuj
estis skribite ambaŭflanke; sur unu flanko kaj sur la
alia estis skribite sur ili. 16 Kaj la tabeloj estis faritaĵo
de Dio, kaj la skribo estis skribo de Dio, gravurita sur
la tabeloj. 17 Kaj Josuo aŭdis la bruon de la popolo
ĝojkrianta, kaj li diris al Moseo: Bruo de batalo estas
en la tendaro. 18 Sed tiu diris: Tio ne estas kriado
de venko, nek kriado de malvenko, sed bruon de
kantantoj mi aŭdas. 19 Kiam li alproksimiĝis al la
tendaro kaj ekvidis la bovidon kaj la dancadon, tiam
ekflamis la kolero de Moseo, kaj li forĵetis el siaj manoj

la tabelojn kaj disrompis ilin sub la monto. 20 Kaj li
prenis la bovidon, kiun ili faris, kaj disbruligis ĝin
per fajro kaj disfrakasis ĝis pulvoreco kaj disŝutis sur
akvo kaj trinkigis ĝin al la Izraelidoj. 21 Kaj Moseo
diris al Aaron: Kion faris al vi ĉi tiu poplo, ke vi
venigis sur ĝin grandan pekon? 22 Kaj Aaron diris:
Ne ekflamu la kolero de mia sinjoro; vi scias, ke la
popolo havas inklinon al malbono; 23 ili diris al mi:
Faru al ni diojn, kiuj irus antaŭ ni; ĉar pri tiu Moseo,
la viro, kiu elkondukis nin el la lando Egipta, ni ne
scias, kio fariĝis kun li. 24 Kaj mi diris al ili: Kiu havas
oron, tiu deprenu ĝin; kaj ili donis al mi, kaj mi ĵetis
ĝin en fajron, kaj eliris ĉi tiu bovido. 25 Ĉar Moseo
vidis, ke la popolo estas sendisciplina, ĉar Aaron
sendisciplinigis ĝin ĝis honto antaŭ la malamikoj, 26
tial Moseo stariĝis ĉe la pordego de la tendaro, kaj
diris: Kiu estas partiano de la Eternulo, tiu venu al mi.
Kaj kolektiĝis al li ĉiuj idoj de Levi. 27 Kaj li diris al
ili: Tiel diris la Eternulo, la Dio de Izrael: Metu ĉiu
sian glavon sur sian femuron, trairu tien kaj reen de
pordego ĝis pordego tra la tendaro, kaj ĉiu mortigu
sian fraton, sian amikon, sian proksimulon. 28 Kaj la
idoj de Levi faris, kiel diris Moseo; kaj estis mortigitaj
el la popolo en tiu tago ĉirkaŭ tri mil homoj. 29 Kaj
Moseo diris: Konsekru vin hodiaŭ al la Eternulo, ĉiu
sur sia filo kaj sur sia frato, por ke estu donata al vi
hodiaŭ beno. 30 La sekvantan tagon Moseo diris al la
popolo: Vi pekis per granda peko; nun mi supreniros
al la Eternulo, eble mi akiros pardonon por via peko.
31 Kaj Moseo revenis al la Eternulo, kaj diris: Ho ve!
tiu popolo pekis per granda peko kaj faris al si orajn
diojn; 32 nun volu pardoni ilian pekon; kaj se ne, tiam
volu elstreki min el Via libro, kiun Vi skribis. 33 Sed
la Eternulo diris al Moseo; Kiu ajn pekis antaŭ Mi,
tiun Mi elstrekos el Mia libro. 34 Kaj nun iru, konduku
la popolon tien, kien Mi diris al vi. Jen Mia anĝelo
iros antaŭ vi; kaj en la tago de Mia rememorigado Mi
rememorigos sur ili ilian pekon. 35 Kaj la Eternulo
frapis la popolon pro tio, ke ili faris la bovidon, kiun
faris Aaron.

**33** Kaj la Eternulo diris al Moseo: Iru, eliru el ĉi tie,
vi kaj la popolo, kiun vi elkondukis el la lando
Egipta, al la lando, pri kiu Mi ĵuris al Abraham, al
Isaak, kaj al Jakob, dirante: Al via idaro Mi ĝin donos.
2 Kaj Mi sendos antaŭ vi anĝelon, kaj Mi forpelos
la Kanaanidojn, la Amoridojn kaj la Ĥetidojn kaj la
Perizidojn, la Ĥividojn kaj la Jebusidojn. 3 Iru al lando,
en kiu fluas lakto kaj mielo. Mi ne iros meze de vi; ĉar
vi estas popolo malmolnuka, kaj Mi eble ekstermus
vin dum la vojo. 4 Kaj la popolo aŭdis tiun malbonan
sciigon, kaj ili ekfunebris, kaj neniu metis sur sin
siajn ornamaĵojn. 5 Kaj la Eternulo diris al Moseo:
Diru al la Izraelidoj: Vi estas popolo malmolnuka;
se Mi nur unu momenton irus meze de vi, Mi vin
ekstermus; nun demetu de vi viajn ornamaĵojn, kaj
Mi rigardos, kion Mi faru kun vi. 6 Kaj la Izraelidoj
demetis de si siajn ornamaĵojn antaŭ la monto Ĥoreb.
7 Moseo prenis la tabernaklon, kaj starigis ĝin ekster
la tendaro, malproksime de la tendaro, kaj nomis
ĝin Tabernaklo de Kunveno; kaj ĉiu, kiu volis peti la
Eternulon, devis eliri al la tabernaklo de kunveno,
kiu estis ekstere de la tendaro. 8 Kaj kiam Moseo
eliradis al la tabernaklo, la tuta popolo leviĝadis, kaj
ĉiu stariĝadis ĉe la pordo de sia tendo kaj rigardadis
post Moseo, ĝis li eniris en la tabernaklon. 9 Kaj kiam
Moseo eniradis en la tabernaklon, malleviĝadis nuba
kolono kaj stariĝadis ĉe la pordo de la tabernaklo kaj
paroladis kun Moseo. 10 Kaj la tuta popolo vidadis la
nuban kolonon, kiu staris ĉe la pordo de la tabernaklo;
kaj la tuta popolo leviĝadis kaj adorkliniĝadis ĉiu ĉe la
pordo de sia tendo. 11 Kaj la Eternulo paroladis kun
Moseo vizaĝon kontraŭ vizaĝo, kiel parolas homo kun
sia amiko. Kaj kiam li reiradis en la tendaron, tiam
lia servanto Josuo, filo de Nun, junulo, ne foriĝadis
el la tabernaklo. 12 Kaj Moseo diris al la Eternulo:
Vidu, Vi diras al mi: Konduku ĉi tiun popolon; kaj Vi
ne sciigis al mi, kiun Vi sendos kun mi, kvankam Vi
diris: Mi konas vin laŭ via nomo, kaj vi akiris Mian
favoron. 13 Nun, se mi akiris Vian favoron, volu sciigi
al mi Vian vojon, por ke mi konu Vin, por akiri Vian
favoron; kaj vidu, ke ĉi tiu popolo estas Via popolo. 14
Tiam Li diris: Mia vizaĝo iros antaŭe, kaj Mi donos
al vi ripozon. 15 Kaj li diris al Li: Se Via vizaĝo ne
iros, tiam ne forkonduku nin de ĉi tie. 16 Per kio do
montriĝos, ke mi kaj Via popolo akiris Vian favoron?
ĉu ne per tio, ke Vi irados kun ni? tiam mi kaj Via
popolo distingiĝos de ĉiu popolo, kiu estas sur la tero.
17 Kaj la Eternulo diris al Moseo: Ankaŭ tion, kion vi
diris, Mi faros; ĉar vi akiris Mian favoron kaj Mi konas
vin laŭ via nomo. 18 Kaj li diris: Volu montri al mi
Vian gloron. 19 Kaj Li diris: Mi preterpasigos antaŭ vi
Mian tutan bonecon, kaj Mi alvokos la nomon de la
Eternulo antaŭ vi; kaj Mi favorkoros tiun, kiun Mi

favorkoros, kaj Mi kompatos tiun, kiun Mi kompatos.
20 Kaj Li diris: Vi ne povas vidi Mian vizaĝon, ĉar ne
povas homo vidi Min kaj resti viva. 21 Kaj la Eternulo
diris: Jen estas loko ĉe Mi; stariĝu sur la roko. 22 Kaj
kiam preteriros Mia gloro, Mi metos vin en fendon de
la roko, kaj Mi ŝirmos vin per Mia mano, ĝis Mi pasos.
23 Kaj kiam Mi formetos Mian manon, vi vidos Mian
malantaŭan flankon, sed Mia vizaĝo ne estos videbla.

34 Kaj la Eternulo diris al Moseo: Skulptu al vi du
ŝtonajn tabelojn kiel la unuaj; kaj Mi skribos sur
la tabeloj la vortojn, kiuj estis sur la unuaj tabeloj,
kiujn vi rompis. 2 Kaj estu preta por la mateno, kaj
supreniru matene sur la monton Sinaj kaj stariĝu
antaŭ Mi tie sur la pinto de la monto. 3 Kaj neniu
supreniru kun vi, kaj ankaŭ neniu montriĝu sur la
tuta monto; eĉ ŝafo aŭ bovo ne paŝtiĝu antaŭ tiu
monto. 4 Kaj li skulptis du ŝtonajn tabelojn kiel la
unuaj; kaj Moseo leviĝis frue matene kaj supreniris
sur la monton Sinaj, kiel ordonis al li la Eternulo, kaj
li prenis en siajn manojn la du ŝtonajn tabelojn. 5 Kaj
la Eternulo malleviĝis en nubo, kaj Moseo stariĝis
apud Li tie kaj alvokis la nomon de la Eternulo.
6 Kaj la Eternulo preteriris antaŭ li, kaj li ekkriis:
Eternulo, Eternulo, Dio indulgema kaj kompatema,
multepacienca, favorkora, kaj verema; 7 kiu konservas
favorkorecon por miloj, pardonas kulpon kaj krimon
kaj pekon, sed antaŭ kiu neniu estas senkulpa; kiu
punas la kulpon de patroj sur filoj kaj nepoj, en la tria
kaj kvara generacioj! 8 Kaj rapide Moseo kliniĝis ĝis la
tero kaj faris adoron. 9 Kaj li diris: Ho, se mi akiris
Vian favoron, mia Sinjoro, tiam mia Sinjoro volu iri
en nia mezo, ĉar tio estas popolo malmolnuka; kaj
pardonu niajn kulpojn kaj niajn pekojn kaj faru nin
Via posedaĵo. 10 Kaj Li diris: Jen Mi faros interligon;
antaŭ via tuta popolo Mi faros miraklojn, kiuj neniam
ekzistis sur la tuta tero nek ĉe iuj gentoj; kaj la tuta
popolo, en kies mezo vi estas, vidos la faron de la
Eternulo; ĉar terura estos tio, kion Mi faros por vi. 11
Observu tion, kion Mi ordonas al vi hodiaŭ. Jen Mi
forpelas antaŭ vi la Amoridojn kaj la Kanaanidojn
kaj la Ĥetidojn kaj la Perizidojn kaj la Ĥividojn kaj
la Jebusidojn. 12 Gardu vin, ke vi ne faru interligon
kun la loĝantoj de la lando, en kiun vi venos, por
ke tio ne fariĝu falilo inter vi; 13 sed iliajn altarojn
detruu kaj iliajn statuojn rompu kaj iliajn sanktajn
stangojn dishaku. 14 Ĉar vi ne devas adori alian dion;
ĉar la Eternulo, koleremulo estas Lia nomo, estas Dio
kolerema. 15 Ne faru interligon kun la loĝantoj de la
lando; ĉar, malĉastante kun siaj dioj kaj alportante
oferojn al siaj dioj, ili eble vokos vin kaj vi manĝos
de iliaj oferoj, 16 kaj vi prenos iliajn filinojn por
viaj filoj, kaj iliaj filinoj malĉastos por siaj dioj kaj
malĉastigos viajn filojn por siaj dioj. 17 Diojn fanditajn
ne faru al vi. 18 La feston de macoj observu; dum
sep tagoj manĝu macojn, kiel Mi ordonis al vi, en la
difinita tempo de la monato Abib, ĉar en la monato
Abib vi eliris el Egiptujo. 19 Ĉio, kio malfermas unue
la uteron, apartenas al mi; ĉiu virseksulo el viaj
brutoj, kiu malfermas unue la uteron, bovo aŭ ŝafo.
20 Utermalferminton el azenoj elaĉetu per ŝafido:
kaj se vi ne elaĉetos, tiam rompu al ĝi la kolon. La
unuenaskiton el viaj filoj elaĉetu. Kaj oni ne montriĝu
antaŭ Mi kun malplenaj manoj. 21 Dum ses tagoj
laboru, kaj en la sepa tago ripozu; en la tempo de la
plugado kaj de la rikoltado ripozu. 22 Kaj feston de
semajnoj faru al vi en la komenco de la rikoltado de
tritiko, kaj feston de kolektado de fruktoj en la fino de
la jaro. 23 Tri fojojn en la jaro ĉiuj viaj virseksuloj
aperu antaŭ la Sinjoro, la Eternulo, Dio de Izrael. 24
Ĉar Mi forpelos gentojn antaŭ vi kaj vastigos viajn
limojn, kaj neniu deziros havi vian landon, kiam
vi iros, por montriĝi antaŭ la Eternulo, via Dio, tri
fojojn en la jaro. 25 Ne buĉverŝu sur fermentintaĵon la
sangon de Mia ofero, kaj ne devas resti ĝis mateno la
ofero de la festo de Pasko. 26 La komencaĵon de la
unuaj produktoj de via tero alportu en la domon de
la Eternulo, via Dio. Ne kuiru kapridon en la lakto
de ĝia patrino. 27 Kaj la Eternulo diris al Moseo:
Skribu al vi ĉi tiujn vortojn, ĉar laŭ ĉi tiuj vortoj
Mi faris interligon kun vi kaj kun Izrael. 28 Kaj li
estis tie kun la Eternulo kvardek tagojn kaj kvardek
noktojn; panon li ne manĝis kaj akvon li ne trinkis;
kaj li skribis sur la tabeloj la vortojn de la interligo, la
dek ordonojn. 29 Kiam Moseo estis malsupreniranta
de la monto Sinaj kaj la du tabeloj de atesto estis
en la manoj de Moseo dum lia malsuprenirado de
la monto, Moseo ne sciis, ke la haŭto de lia vizaĝo
lumradiis pro tio, ke li parolis kun Li. 30 Kaj Aaron kaj
ĉiuj Izraelidoj ekvidis Moseon, kaj jen la haŭto de lia
vizaĝo lumradias; kaj ili timis alproksimiĝi al li. 31
Sed Moseo vokis ilin, kaj returniĝis al li Aaron kaj
ĉiuj ĉefoj de la komunumo, kaj Moseo ekparolis al ili.
32 Poste alproksimiĝis ĉiuj Izraelidoj; kaj li ordonis

al ili ĉion, kion diris al li la Eternulo sur la monto
Sinaj. 33 Kiam Moseo ĉesis paroli al ili, li metis sur
sian vizaĝon kovrotukon. 34 Kiam Moseo venadis
antaŭ la Eternulon, por paroli kun Li, li formetadis
la kovrotukon ĝis sia eliro; kaj elirinte, li diradis al
la Izraelidoj tion, kio estis ordonita al li. 35 Kaj la
Izraelidoj vidis, ke la haŭto de la vizaĝo de Moseo
lumradias; kaj tiam Moseo denove metis la kovrotukon
sur sian vizaĝon, ĝis li eniris, por paroli kun Li.

**35** Kaj Moseo kunvenigis la tutan komunumon de
la Izraelidoj, kaj diris al ili: Jen kion la Eternulo
ordonis al vi fari: 2 Dum ses tagoj faru laboron, sed
la sepa tago estu por vi sankta, sabato de ripozo
al la Eternulo; ĉiu, kiu faros en ĝi laboron, estu
mortigita. 3 Ne bruligu fajron en ĉiuj viaj loĝejoj
en la tago sabata. 4 Kaj Moseo ekparolis al la tuta
komunumo de la Izraelidoj, dirante: Jen kion ordonis
la Eternulo: 5 Prenu inter vi oferdonon por la Eternulo:
ĉiu memvole alportu la oferdonon por la Eternulo:
oron kaj arĝenton kaj kupron, 6 kaj bluan teksaĵon
kaj purpuran kaj ruĝan, kaj bisinon kaj kapran
lanon, 7 kaj virŝafajn felojn ruĝe kolorigitajn, kaj
antilopajn felojn, kaj akacian lignon, 8 kaj oleon por
lumigado, kaj aromaĵojn por la sankta oleo kaj por la
bonodoraj incensoj, 9 kaj ŝtonojn oniksajn kaj ŝtonojn
enkadrigeblajn por la efodo kaj por la surbrustaĵo.
10 Kaj ĉiu el vi, kiu estas kompetentulo, venu kaj
faru ĉion, kion ordonis la Eternulo: 11 la tabernaklon
kaj ĝian tendon kaj ĝian kovron, ĝiajn hoketojn kaj
ĝiajn tabulojn, ĝiajn riglilojn, ĝiajn kolonojn kaj ĝiajn
bazojn; 12 la keston kaj ĝiajn stangojn, la fermoplaton
kaj la kurtenon; 13 la tablon kaj ĝiajn stangojn kaj
ĉiujn ĝiajn apartenaĵojn kaj la panojn de propono; 14
kaj la kandelabron por lumigi kaj ĝiajn apartenaĵojn
kaj ĝiajn lucernojn kaj la oleon por lumigi; 15 kaj
la altaron de incensado kaj ĝiajn stangojn kaj la
sanktan oleon kaj la bonodoran incenson kaj la pordan
kovrotukon antaŭ la pordo de la tabernaklo; 16 la
altaron de bruloferoj kaj ĝian kupran kradon, ĝiajn
stangojn kaj ĉiujn ĝiajn apartenaĵojn, la lavujon kaj
ĝian piedestalon; 17 la kurtenojn de la korto, ĝiajn
kolonojn kaj bazojn kaj la kovrotukon de la pordego
de la korto; 18 la najlojn de la tabernaklo kaj la najlojn
de la korto kaj iliajn ŝnurojn; 19 la oficajn vestojn
por servado en la sanktejo, la sanktajn vestojn por la
pastro Aaron kaj la pastrajn vestojn de liaj filoj. 20
Kaj la tuta komunumo de la Izraelidoj eliris de antaŭ
Moseo. 21 Kaj venis ĉiuj homoj, kiujn tiris la koro; kaj
ĉiu, kiun inklinigis lia spirito, alportis la oferdonon
por la Eternulo, por la aranĝo de la tabernaklo de
kunveno kaj por ĝia tuta servado kaj por la sanktaj
vestoj. 22 Kaj venis la viroj kaj la virinoj; ĉiuj, kiujn
inklinigis la koro, alportis bukojn kaj orelringojn
kaj ringojn kaj kolringojn, diversajn orajn objektojn;
kaj ĉiu alportis oran oferdonon al la Eternulo. 23
Kaj ĉiu, ĉe kiu troviĝis blua teksaĵo, aŭ purpura, aŭ
ruĝa, aŭ bisino, aŭ kapra lano, aŭ ŝafaj feloj ruĝaj, aŭ
antilopaj feloj, alportis. 24 Ĉiu, kiu oferis arĝenton
aŭ kupron, alportis la oferdonon por la Eternulo; kaj
ĉiu, ĉe kiu troviĝis akacia ligno por ĉia bezono de la
servado, alportis ĝin. 25 Kaj ĉiu virino, kiu havis ian
kompetentecon, ŝpinis kaj alportis ŝpinitan lanon
bluan kaj purpuran kaj ruĝan kaj bisinon. 26 Kaj
ĉiuj virinoj, kiuj havis deziron kaj kompetentecon,
ŝpinis kapran lanon. 27 Kaj la princoj alportis ŝtonojn
oniksajn kaj ŝtonojn enkadrigeblajn por la efodo kaj
por la surbrustaĵo, 28 kaj la aromaĵon kaj la oleon por
lumigi kaj por la sankta oleo kaj por la bonodoraj
incensoj. 29 Ĉiu viro kaj virino el la Izraelidoj, kiujn
inklinigis ilia koro alporti por ĉia laboro, kiun la
Eternulo per Moseo ordonis fari, alportis oferon al la
Eternulo. 30 Kaj Moseo diris al la Izraelidoj: Jen, la
Eternulo vokis per la nomo Becalelon, filon de Uri,
filo de Ĥur, el la tribo de Jehuda; 31 kaj Li plenigis lin
per Dia spirito, per saĝo kaj prudento, kaj scio kaj per
ĉia arto, 32 por pripensi ideojn, por labori el oro kaj
el arĝento kaj el kupro, 33 kaj por ĉizi ŝtonojn por
enkadrigo, kaj por ĉizi lignon, por fari ĉian artistan
laboron. 34 Kaj Li donis al li la kapablon instrui, al li
kaj al Oholiab, filo de Aĥisamaĥ, el la tribo de Dan. 35
Li plenigis ilin per kompetenteco por farado de ĉia
majstra laboro, por ĉia talenta brodado sur teksaĵo
blua kaj purpura kaj ruĝa kaj sur bisino, por teksado
de ĉia laboraĵo kaj pripensado de ideoj.

**36** Kaj laboros Becalel kaj Oholiab kaj ĉiuj
kompetentuloj, en kiujn la Eternulo enmetis
saĝon kaj prudenton, por ke ili sciu fari ĉiun laboron
por la servado en la sanktejo, laŭ ĉio, kion ordonis la
Eternulo. 2 Kaj Moseo alvokis Becalelon kaj Oholiabon,
kaj ĉiun kompetentulon, al kiu la Eternulo enmetis
saĝon en la koron, ĉiun, kiun tiris lia koro entrepreni
la laboron kaj fari ĝin. 3 Kaj ili prenis de Moseo ĉiujn
oferdonojn, kiujn alportis la Izraelidoj por la bezonoj

de la servado en la sanktejo, por ellabori ilin. Kaj tiuj
alportadis al li ankoraŭ plue oferdonojn ĉiumatene.
4 Kaj venis ĉiuj saĝuloj, kiuj estis farantaj la tutan
laboron por la sanktejo, ĉiu venis de sia laboro, kiun li
faris. 5 Kaj ili diris al Moseo jene: La popolo alportas
pli multe, ol bezonas la laboroj, kiujn la Eternulo
ordonis fari. 6 Tiam Moseo ordonis, kaj oni elkriis
en la tendaro jene: Neniu viro kaj neniu virino faru
plue laboraĵon, por oferdoni al la sanktejo. Kaj la
popolo ĉesis alporti. 7 Kaj la alportitaĵo estis sufiĉa
por la tuta farota laboro, kaj eĉ superflua. 8 Kaj ĉiuj
kompetentuloj inter tiuj, kiuj estis farantaj la laboron
por la tabernaklo, faris dek tapiŝojn el tordita bisino
kaj el blua, purpura, kaj ruĝa teksaĵo; kerubojn artiste
laboritajn ili faris sur ili. 9 La longo de ĉiu tapiŝo
estis dudek ok ulnoj, kaj la larĝo de ĉiu tapiŝo estis
kvar ulnoj; unu mezuro estis por ĉiuj tapiŝoj. 10 Kaj
li kunigis kvin tapiŝojn unu kun la alia, kaj la kvin
ceterajn ankaŭ unu kun la alia. 11 Kaj li faris maŝojn
el blua teksaĵo sur la rando de unu tapiŝo, sur la
rando de la kuniĝo; tiel same li faris sur la rando de
la ekstrema tapiŝo, sur la dua rando de kuniĝo. 12
Kvindek maŝojn li faris sur unu tapiŝo, kaj kvindek
maŝojn li faris sur la rando de tiu tapiŝo, sur kiu estis
la dua flanko de la kuniĝo; la maŝoj estis reciproke
aranĝitaj unu kontraŭ alia. 13 Kaj li faris kvindek
orajn hoketojn, kaj li kunigis la tapiŝojn unu kun
la alia per la hoketoj; kaj la tabernaklo fariĝis unu
tutaĵo. 14 Kaj li faris tapiŝojn el kapra lano kiel kovron
super la tabernaklo; dek unu tiajn tapiŝojn li faris.
15 La longo de ĉiu tapiŝo estis tridek ulnoj, kaj kvar
ulnoj estis la larĝo de ĉiu tapiŝo; unu mezuro estis
por la dek unu tapiŝoj. 16 Kaj li kunigis kvin tapiŝojn
aparte kaj la ceterajn ses tapiŝojn aparte. 17 Kaj li
faris kvindek maŝojn sur la rando de la ekstrema
tapiŝo, sur la rando de la kuniĝo, kaj kvindek maŝojn
li faris sur la rando de la dua kuniĝa tapiŝo. 18 Kaj li
faris kvindek kuprajn hoketojn, por kunigi la tendon,
por ke ĝi estu unu tutaĵo. 19 Kaj li faris kovron por
la tendo el ruĝaj virŝafaj feloj kaj ankoraŭ kovron
el antilopaj feloj supre. 20 Kaj li faris la tabulojn
por la tabernaklo, starantajn, el akacia ligno. 21 Dek
ulnoj estis la longo de ĉiu tabulo, kaj unu ulno kaj
duono la larĝo de ĉiu tabulo. 22 Ĉiu tabulo havis du
pivotojn, alĝustigitajn unu al la alia; tiel li faris ĉe
ĉiuj tabuloj de la tabernaklo. 23 Kaj li faris la tabulojn
por la tabernaklo; dudek tabulojn sur la flanko suda.
24 Kaj kvardek arĝentajn bazojn li faris sub la dudek
tabuloj, du bazojn sub ĉiu tabulo, por ĝiaj du pivotoj.
25 Kaj sur la dua flanko de la tabernaklo, sur la flanko
norda, li faris dudek tabulojn, 26 kaj kvardek arĝentajn
bazojn por ili, du bazojn sub ĉiu tabulo. 27 Kaj sur la
malantaŭa flanko de la tabernaklo, okcidente, li faris
ses tabulojn. 28 Kaj du tabulojn li faris en la anguloj de
la tabernaklo sur la malantaŭa flanko. 29 Kaj ili estis
kunigitaj malsupre kaj kunigitaj supre per unu ringo;
tiel li faris kun ambaŭ en la du anguloj. 30 Kaj estis ok
tabuloj, kaj ĉe ili dek ses arĝentaj bazoj, po du bazoj
sub ĉiu tabulo. 31 Kaj li faris riglilojn el akacia ligno:
kvin por la tabuloj de unu flanko de la tabernaklo,
32 kaj kvin riglilojn por la tabuloj de la dua flanko
de la tabernaklo, kaj kvin riglilojn por la tabuloj de
la malantaŭa flanko de la tabernaklo, okcidente. 33
Kaj li faris mezan riglilon, kiu ŝoviĝis meze de la
tabuloj de unu fino ĝis la alia. 34 Kaj la tabulojn li
tegis per oro, kaj iliajn ringojn, ingojn por la rigliloj,
li faris el oro, kaj la riglilojn li tegis per oro. 35 Kaj li
faris la kurtenon el blua, purpura, kaj ruĝa teksaĵo,
kaj el tordita bisino; per artista laboro li faris sur ĝi
kerubojn. 36 Kaj li faris por ĝi kvar kolonojn el akacia
ligno, kaj li tegis ilin per oro, kaj iliaj hoketoj estis el
oro; kaj li fandis por ili kvar arĝentajn bazojn. 37 Kaj
li faris kovrotukon por la pordo de la tabernaklo, el
blua, purpura, kaj ruĝa teksaĵo, kaj el tordita bisino,
kun brodaĵoj; 38 kaj kvin kolonojn por ĝi kun iliaj
hoketoj; kaj li tegis iliajn kapojn kaj ligaĵojn per oro;
kaj por ili kvin kuprajn bazojn.

**37** Kaj Becalel faris la keston el akacia ligno; du
ulnoj kaj duono estis ĝia longo, kaj unu ulno
kaj duono ĝia larĝo, kaj unu ulno kaj duono ĝia alto.
2 Kaj li tegis ĝin per pura oro interne kaj ekstere,
kaj li faris al ĝi oran kronon ĉirkaŭe. 3 Kaj li fandis
por ĝi kvar orajn ringojn sur ĝiaj kvar anguloj: du
ringojn sur unu ĝia flanko kaj du ringojn sur ĝia alia
flanko. 4 Kaj li faris stangojn el akacia ligno kaj tegis
ilin per oro. 5 Kaj li metis la stangojn en la ringojn
sur la flankoj de la kesto, por porti la keston. 6 Kaj
li faris fermoplaton el pura oro; du ulnoj kaj duono
estis ĝia longo, kaj unu ulno kaj duono ĝia larĝo. 7
Kaj li faris du kerubojn el oro; per forĝa laboro li
faris ilin, sur la du randoj de la fermoplato: 8 unu
kerubon ĉe unu flanko kaj la duan kerubon ĉe la dua
flanko; elstarantaj el la fermoplato li faris la kerubojn,

sur ĝiaj du flankoj. 9 Kaj la keruboj estis etendantaj
siajn flugilojn supren, kovrante per siaj flugiloj la
fermoplaton, kaj iliaj vizaĝoj estis unu kontraŭ la
alia; al la fermoplato estis turnitaj la vizaĝoj de la
keruboj. 10 Kaj li faris la tablon el akacia ligno; du
ulnoj estis ĝia longo, kaj unu ulno ĝia larĝo, kaj unu
ulno kaj duono ĝia alto. 11 Kaj li tegis ĝin per pura
oro, kaj li faris al ĝi oran kronon ĉirkaŭe. 12 Kaj li
faris ĉirkaŭ ĝi manlarĝan listelon, kaj li faris oran
kronon ĉirkaŭ la listelo. 13 Kaj li fandis por ĝi kvar
orajn ringojn, kaj li alfortikigis la ringojn sur la kvar
anguloj, ĉe ĝiaj kvar piedoj. 14 Apud la listelo estis la
ringoj, kiel ingoj por la stangoj, por porti la tablon. 15
Kaj li faris la stangojn el akacia ligno, kaj li tegis ilin
per oro, por porti la tablon. 16 Kaj ankaŭ la vazojn
por la tablo, ĝiajn pladojn kaj ĝiajn kulerojn, kaj ĝiajn
kruĉojn kaj la kalikojn, per kiuj oni verŝas, li faris el
pura oro. 17 Kaj li faris la kandelabron el pura oro,
per forĝa laboro li faris la kandelabron; ĝia trunko
kaj ĝiaj branĉoj, ĝiaj kalikoj, ĝiaj kapetoj, kaj ĝiaj
floroj elstaris el ĝi. 18 Kaj ses branĉoj elstaris el ĝiaj
flankoj: tri branĉoj de la kandelabro el unu flanko, kaj
tri branĉoj de la kandelabro el la dua flanko; 19 tri
migdalformaj kalikoj, kapeto, kaj floro estis sur unu
branĉo, kaj tri migdalformaj kalikoj, kapeto, kaj floro
sur la dua branĉo; tiel estis sur la ses branĉoj, kiuj
elstaris el la kandelabro. 20 Kaj sur la kandelabro estis
kvar migdalformaj kalikoj kun siaj kapetoj kaj floroj.
21 Kaj kapeto estis sub unu paro da branĉoj, kaj kapeto
sub la dua paro da branĉoj, kaj kapeto sub la tria paro
da branĉoj; tiel estis ĉe la ses branĉoj, kiuj elstaris el
ĝi. 22 La kapetoj kaj branĉoj elstaris el ĝi; ĉio estis
unu forĝita tutaĵo el pura oro. 23 Kaj li faris ĝiajn sep
lucernojn kaj ĝiajn prenilojn kaj cindrujojn el pura
oro. 24 El kikaro da pura oro li faris ĝin kaj ĉiujn ĝiajn
apartenaĵojn. 25 Kaj li faris la altaron por la incensado
el akacia ligno; unu ulno estis ĝia longo, kaj unu ulno
ĝia larĝo; kvarangula ĝi estis; du ulnoj estis ĝia alto;
el ĝi elstaris ĝiaj kornoj. 26 Kaj li tegis ĝin per pura
oro, ĝian supran platon kaj ĝiajn muretojn ĉirkaŭe kaj
ĝiajn kornojn; kaj li faris al ĝi oran kronon ĉirkaŭe. 27
Kaj du orajn ringojn li faris al ĝi sub ĝia krono, sur
ĝiaj du flankoj, kiel ingojn por stangoj, per kiuj oni
portu ĝin. 28 Kaj li faris la stangojn el akacia ligno
kaj tegis ilin per oro. 29 Kaj li faris la oleon por la
sanktoleado kaj la puran bonodoran incenson laŭ la
arto de ŝmiraĵisto.

**38** Kaj li faris la altaron por la bruloferoj el akacia
ligno; kvin ulnoj estis ĝia longo, kaj kvin ulnoj
ĝia larĝo; kvarangula ĝi estis; kaj tri ulnoj estis ĝia
alto. 2 Kaj li faris ĝiajn kornojn sur ĝiaj kvar anguloj;
el ĝi elstaris ĝiaj kornoj; kaj li tegis ĝin per kupro.
3 Kaj li faris ĉiujn vazojn de la altaro; la potojn, la
ŝovelilojn, la kalikojn, la forkojn, la karbujojn; ĉiujn
ĝiajn vazojn li faris el kupro. 4 Kaj li faris por la
altaro kradon en formo de kupra reto, sub ĝia kornico,
malsupre, ĝis la mezo. 5 Kaj li fandis kvar ringojn en
la kvar anguloj de la kupra krado, ke ili estu ingoj por
la stangoj. 6 Kaj li faris la stangojn el akacia ligno
kaj tegis ilin per kupro. 7 Kaj li metis la stangojn
en la ringojn sur la flankoj de la altaro, por ke oni
povu porti ĝin per ili; li faris ĝin interne malplena,
el tabuloj. 8 Kaj li faris la lavujon el kupro kaj ĝian
piedestalon el kupro, el la speguloj de la virinoj, kiuj
kolektiĝis amase antaŭ la pordo de la tabernaklo de
kunveno. 9 Kaj li faris la korton: sur la flanko suda
estis la kurtenoj de la korto el tordita bisino, cent
ulnoj, 10 kaj al ili dudek kolonoj kun dudek kupraj
bazoj; la hokoj de la kolonoj kaj iliaj ligaĵoj estis el
arĝento. 11 Kaj sur la norda flanko ankaŭ cent ulnoj,
kaj al ili dudek kolonoj kaj dudek kupraj bazoj; la
hokoj de la kolonoj kaj iliaj ligaĵoj estis el arĝento. 12
Kaj sur la okcidenta flanko estis kurtenoj de kvindek
ulnoj, kaj al ili dek kolonoj kun dek bazoj; la hokoj de
la kolonoj kaj iliaj ligaĵoj estis el arĝento. 13 Kaj sur
la orienta flanko kvindek ulnoj. 14 Kurtenoj de dek
kvin ulnoj sur unu latero, kaj al tio tri kolonoj kun
tri bazoj. 15 Kaj sur la dua latero, sur ambaŭ flankoj
de la pordego de la korto estis kurtenoj po dek kvin
ulnoj, kaj al ili po tri kolonoj kun tri bazoj. 16 Ĉiuj
kurtenoj de la korto ĉirkaŭe estis el tordita bisino. 17
Kaj la bazoj de la kolonoj estis el kupro, la hokoj de
la kolonoj kaj iliaj ligaĵoj el arĝento, kaj iliaj kapoj
estis tegitaj per arĝento, kaj ĉiuj kolonoj de la korto
estis kunigitaj per arĝentaj ligaĵoj. 18 Kaj la kovrotuko
de la pordego de la korto estis brodita laboraĵo el
blua, purpura, kaj ruĝa teksaĵo, kaj el tordita bisino;
kaj dudek ulnoj estis ĝia longo, kaj kvin ulnoj ĝia
larĝo, laŭ la mezuro de la kurtenoj de la korto. 19 Kaj
al ĝi apartenis kvar kolonoj kun kvar kupraj bazoj;
iliaj hokoj estis el arĝento, iliaj kapoj estis tegitaj per
arĝento, kaj iliaj ligaĵoj estis el arĝento. 20 Kaj ĉiuj
najloj en la tabernaklo kaj en la korto ĉirkaŭe estis
el kupro. 21 Jen estas la kalkulo pri la tabernaklo, la

tabernaklo de atesto, kiu estis kalkulita laŭ la ordono
de Moseo, por la servo de la Levidoj, sub la kontrolo
de Itamar, filo de la pastro Aaron. 22 Kaj Becalel,
filo de Uri, filo de Ĥur, el la tribo de Jehuda, faris
ĉion, kion ordonis la Eternulo al Moseo; 23 kaj kun li
Oholiab, filo de Aĥisamaĥ, el la tribo de Dan, artista
skulptisto, teksisto, kaj brodisto sur blua, purpura,
kaj ruĝa teksaĵo, kaj sur bisino. 24 La tuta oro, kiu
estis uzita por ĉiuj laboroj de la sanktejo, la oro, kiu
estis alportita kiel oferdonoj, prezentis la kvanton
de dudek naŭ kikaroj kaj sepcent tridek sikloj laŭ la
mezuro de la sankta siklo. 25 Kaj la arĝento, akirita per
la kalkulado de la komunumo, prezentis la kvanton
de cent kikaroj kaj mil sepcent sepdek kvin sikloj laŭ
la sankta siklo: 26 po unu bek'o, tio estas po duono de
siklo laŭ la sankta siklo, por ĉiu kapo, de ĉiuj, kiuj
trapasis la kalkulon, kiuj havis la aĝon de dudek jaroj
kaj pli, de sescent tri mil kvincent kvindek homoj.
27 Cent kikaroj da arĝento estis uzitaj por elfandi la
bazojn de la sanktejo kaj la bazojn de la kurteno; cent
bazoj el cent kikaroj, po unu kikaro por bazo. 28 Kaj el
mil sepcent sepdek kvin sikloj estis faritaj hokoj por
la kolonoj kaj estis tegitaj iliaj kapoj kaj estis faritaj
ligaĵoj inter ili. 29 Kaj da oferdonita kupro estis sepdek
kikaroj kaj du mil kvarcent sikloj. 30 Kaj li faris el ĝi
la bazojn por la pordo de la tabernaklo de kunveno
kaj la kupran altaron kaj la kupran kradon por ĝi kaj
ĉiujn apartenaĵojn de la altaro, 31 kaj la bazojn de la
korto ĉirkaŭe kaj la bazojn de la pordego de la korto
kaj ĉiujn najlojn de la tabernaklo kaj ĉiujn najlojn de
la korto ĉirkaŭe.

**39** Kaj el la blua, purpura, kaj ruĝa teksaĵo ili faris la
oficajn vestojn por la servado en la sanktejo; kaj
ili faris la sanktajn vestojn por Aaron, kiel la Eternulo
ordonis al Moseo. 2 Kaj ili faris la efodon el oro, el
blua, purpura, kaj ruĝa teksaĵo, kaj el tordita bisino.
3 Kaj ili batetendis foliojn da oro kaj tranĉis ilin en
formo de fadenoj, por enteksi internen de la blua,
purpura, kaj ruĝa teksaĵo kaj de la bisino per artista
laboro. 4 Surŝultraĵojn kunigantajn ili faris al ĝi; sur
siaj du finoj ĝi estis ligita. 5 Kaj la ĉirkaŭliganta zono
sur ĝi estis kontinuaĵo de ĝi, la sama laboraĵo, el
oro, el blua, purpura, kaj ruĝa teksaĵo, kaj el tordita
bisino; kiel la Eternulo ordonis al Moseo. 6 Kaj ili faris
la oniksajn ŝtonojn, ĉirkaŭe enkadrigitajn per oro,
gravuritajn per sigelila gravurado laŭ la nomoj de la
filoj de Izrael. 7 Kaj li metis ilin sur la surŝultraĵojn
de la efodo, kiel ŝtonojn de memoro pri la filoj de
Izrael; kiel la Eternulo ordonis al Moseo. 8 Kaj ili faris
la surbrustaĵon per artista laboro, simile al la laboro
de la efodo, el oro, el blua, purpura, kaj ruĝa teksaĵo,
kaj el tordita bisino. 9 Ĝi estis kvarangula; ili faris
la surbrustaĵon duobla; manstreĉo estis ĝia longo,
kaj manstreĉo ĝia larĝo; ĝi estis duobla. 10 Kaj ili
enmetis en ĝin kvar vicojn da ŝtonoj. La unua vico
estis: rubeno, topazo, kaj smeraldo; 11 kaj la dua vico:
hiacinto, safiro, kaj jaspiso; 12 kaj la tria vico: ligurio,
agato, kaj ametisto; 13 kaj la kvara vico: krizolito,
onikso, kaj berilo. Ĉiuj vicoj estis en oraj kadretoj. 14
Kaj la ŝtonoj estis laŭ la nomoj de la filoj de Izrael;
dek du, laŭ iliaj nomoj, gravuritaj sigelile, ĉiu kun
sia nomo, por la dek du triboj. 15 Kaj ili faris al la
surbrustaĵo plektitajn ĉenetojn, kuniĝantajn per siaj
finoj, el pura oro. 16 Kaj ili faris du orajn kadretojn
kaj du orajn ringojn, kaj alfortikigis la du ringojn al la
du finoj de la surbrustaĵo. 17 Kaj ili metis la du orajn
plektitajn ĉenetojn en la du ringojn ĉe la finoj de
la surbrustaĵo. 18 Kaj la du finojn de la du plektitaj
ĉenetoj ili alfortikigis al la du kadretoj, kaj alfortikigis
ilin al la surŝultraĵoj de la efodo sur la antaŭa flanko.
19 Kaj ili faris du orajn ringojn, kaj alfortikigis ilin al la
du aliaj finoj de la surbrustaĵo, sur ĝia rando interna,
direktita al la efodo. 20 Kaj ili faris du orajn ringojn,
kaj alfortikigis ilin al la du surŝultraĵoj de la efodo
malsupre, sur la antaŭa flanko, ĉe ĝia kuniĝo, super
la zono de la efodo. 21 Kaj ili alligis la surbrustaĵon
per ĝiaj ringoj al la ringoj de la efodo per laĉo el blua
ŝtofo, por ke ĝi estu super la zono de la efodo kaj por
ke la surbrustaĵo ne forŝoviĝu de sur la efodo; kiel la
Eternulo ordonis al Moseo. 22 Kaj li faris la tunikon
por la efodo, teksitan, tutan el blua teksaĵo. 23 Kaj la
aperturo de la tuniko estis en la mezo, kiel aperturo
de ŝildo; borderon havis la aperturo ĉirkaŭe, por ke ĝi
ne disŝiriĝu. 24 Kaj ili faris sur la malsupra rando de
la tuniko granatojn el blua, purpura, kaj ruĝa ŝtofo,
tordita. 25 Kaj ili faris tintilojn el pura oro, kaj metis la
tintilojn mezen de la granatoj sur la malsupra rando
de la tuniko, ĉirkaŭe inter la granatoj; 26 tintilon
kaj granaton, tintilon kaj granaton sur la malsupra
rando de la tuniko, ĉirkaŭe, por la servado; kiel la
Eternulo ordonis al Moseo. 27 Kaj ili faris la ĥitonon
el bisino, teksitan, por Aaron kaj liaj filoj, 28 kaj la
cidaron el bisino, kaj la ornamajn mitrojn el bisino,

kaj la linajn pantalonojn el tordita bisino, 29 kaj la
zonon el tordita bisino kaj el blua, purpura, kaj ruĝa
teksaĵo, broditan; kiel la Eternulo ordonis al Moseo.
30 Kaj ili faris la tabuleton, la sanktan kronon, el pura
oro, kaj ili skribis sur ĝi skribon gravuritan: SANKTA
AL LA ETERNULO. 31 Kaj ili alfortikigis al ĝi laĉon
el blua ŝtofo, por alfortikigi al la cidaro supre; kiel
la Eternulo ordonis al Moseo. 32 Tiel finiĝis la tuta
laboro por la konstruaĵo de la tabernaklo de kunveno.
Kaj la Izraelidoj faris konforme al ĉio, kion la Eternulo
ordonis al Moseo; tiel ili faris. 33 Kaj ili alportis la
konstruaĵon al Moseo, la tabernaklon kaj ĉiujn ĝiajn
apartenaĵojn: hokojn, tabulojn, riglilojn, kolonojn, kaj
bazojn; 34 kaj la kovron el ruĝaj virŝafaj feloj kaj la
kovron el antilopaj feloj kaj la kurtenon; 35 la keston
de atesto kaj ĝiajn stangojn kaj la fermoplaton; 36
la tablon, ĉiujn ĝiajn apartenaĵojn, kaj la panon de
propono; 37 la puran kandelabron, ĝiajn lucernojn, la
lucernojn vice starantajn, ĉiujn ĝiajn apartenaĵojn,
kaj la oleon por lumigado; 38 kaj la oran altaron
kaj la sanktan oleon kaj la bonodoran incenson kaj
la kovrotukon por la pordo de la tabernaklo; 39 la
kupran altaron kaj la kupran kradon por ĝi, ĝiajn
stangojn kaj ĉiujn ĝiajn apartenaĵojn, la lavujon kaj
ĝian piedestalon; 40 la kurtenojn de la korto, ĝiajn
kolonojn kaj bazojn, la kovrotukon por la pordego de la
korto, ĝiajn ŝnurojn kaj najlojn, kaj ĉion, kio apartenas
al la servado en la konstruaĵo de la tabernaklo de
kunveno; 41 la oficajn vestojn por la servado en la
sanktejo, la sanktajn vestojn por la pastro Aaron kaj la
pastrajn vestojn por liaj filoj. 42 Konforme al ĉio, kion
la Eternulo ordonis al Moseo, tiel la Izraelidoj faris la
tutan laboron. 43 Kaj Moseo vidis la tutan laboron, li
vidis, ke ili faris ĝin tute tiel, kiel la Eternulo ordonis;
kaj Moseo benis ilin.

**40** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2 En
la unua monato, en la unua tago de la monato
starigu la konstruaĵon de la tabernaklo de kunveno. 3
Kaj metu tien la keston de atesto kaj ŝirmu la keston
per la kurteno. 4 Kaj enportu la tablon kaj aranĝu
sur ĝi ĝian aranĝotaĵon, kaj enportu la kandelabron
kaj ekbruligu ĝiajn lucernojn. 5 Kaj starigu la oran
altaron por la incensado antaŭ la kesto de atesto, kaj
pendigu la kovrotukon ĉe la eniro de la tabernaklo.
6 Kaj starigu la altaron de bruloferoj antaŭ la eniro
en la konstruaĵon de la tabernaklo de kunveno. 7
Kaj starigu la lavujon inter la tabernaklo de kunveno
kaj la altaro kaj enverŝu en ĝin akvon. 8 Kaj aranĝu
la korton ĉirkaŭe, kaj pendigu la kovrotukon ĉe la
pordego de la korto. 9 Kaj prenu la sanktan oleon,
kaj sanktoleu la loĝejon, kaj ĉion, kio estas en ĝi, kaj
sanktigu ĝin kun ĉiuj ĝiaj apartenaĵoj, por ke ĝi estu
sankta. 10 Kaj sanktoleu la altaron de bruloferoj kun
ĉiuj ĝiaj apartenaĵoj, kaj sanktigu la altaron, ke la
altaro estu tre sankta. 11 Kaj sanktoleu la lavujon kaj
ĝian piedestalon, kaj sanktigu ĝin. 12 Kaj alkonduku
Aaronon kaj liajn filojn al la eniro de la tabernaklo de
kunveno, kaj lavu ilin per akvo. 13 Kaj vestu Aaronon
per la sanktaj vestoj kaj sanktoleu lin kaj sanktigu lin,
ke li estu Mia pastro. 14 Kaj liajn filojn alkonduku, kaj
vestu ilin per ĥitonoj. 15 Kaj sanktoleu ilin, kiel vi
sanktoleis ilian patron, ke ili estu Miaj pastroj; kaj ilia
sanktoleiteco estu por ili por eterna pastreco en iliaj
generacioj. 16 Kaj Moseo faris konforme al ĉio, kion
la Eternulo al li ordonis; tiel li faris. 17 En la unua
monato de la dua jaro, en la unua tago de la monato
estis starigita la tabernaklo. 18 Kaj Moseo starigis la
tabernaklon kaj metis ĝiajn bazojn kaj starigis ĝiajn
tabulojn kaj aranĝis ĝiajn riglilojn kaj starigis ĝiajn
kolonojn. 19 Kaj li etendis tendon super la tabernaklo
kaj metis la kovron de la tendo sur ĝin supre, kiel la
Eternulo ordonis al Moseo. 20 Kaj li prenis kaj metis la
ateston en la keston, kaj almetis la stangojn al la kesto
kaj surmetis la fermoplaton sur la keston supre. 21 Kaj
li envenigis la keston en la tabernaklon, kaj pendigis
la kurtenon kaj ŝirmis la keston de atesto, kiel la
Eternulo ordonis al Moseo. 22 Kaj li starigis la tablon
en la tabernaklo de kunveno, en la norda parto de la
tabernaklo, ekster la kurteno. 23 Kaj li aranĝis sur
ĝi vicon da panoj antaŭ la Eternulo, kiel la Eternulo
ordonis al Moseo. 24 Kaj li starigis la kandelabron
en la tabernaklo de kunveno kontraŭ la tablo, en la
suda parto de la tabernaklo. 25 Kaj li ekbruligis la
lucernojn antaŭ la Eternulo, kiel la Eternulo ordonis
al Moseo. 26 Kaj li starigis la oran altaron en la
tabernaklo de kunveno antaŭ la kurteno. 27 Kaj li
bruligis sur ĝi bonodoran incenson, kiel la Eternulo
ordonis al Moseo. 28 Kaj li pendigis la kovrotukon
ĉe la pordo de la tabernaklo. 29 Kaj la altaron de
bruloferoj li starigis ĉe la eniro de la tabernaklo de
kunveno, kaj li alportis sur ĝi la bruloferon kaj la
farunoferon, kiel la Eternulo ordonis al Moseo. 30 Kaj
li starigis la lavujon inter la tabernaklo de kunveno

kaj la altaro, kaj enverŝis tien akvon por sin lavi. **31**
Kaj lavis per ĝi Moseo kaj Aaron kaj liaj filoj siajn
manojn kaj siajn piedojn; **32** kiam ili eniradis en la
tabernaklon de kunveno kaj aliradis al la altaro, ili
lavadis sin; kiel la Eternulo ordonis al Moseo. **33** Kaj
li aranĝis la korton ĉirkaŭe de la tabernaklo kaj de
la altaro, kaj li pendigis la kovrotukon ĉe la pordego
de la korto. Tiamaniere Moseo finis la laboron. **34**
Kaj nubo kovris la tabernaklon de kunveno, kaj la
majesto de la Eternulo plenigis la tabernaklon. **35** Kaj
Moseo ne povis eniri en la tabernaklon de kunveno,
ĉar kuŝis sur ĝi la nubo kaj la majesto de la Eternulo
plenigis la tabernaklon. **36** Kaj kiam la nubo leviĝadis
de sur la tabernaklo, la Izraelidoj ekmarŝadis, por fari
ĉiujn siajn marŝojn. **37** Sed se la nubo ne leviĝis, ili ne
ekmarŝis ĝis la tago de ĝia leviĝo. **38** Ĉar nubo de la
Eternulo estis super la tabernaklo dum la tago, kaj
fajro estis dum la nokto super ĝi, antaŭ la okuloj de
ĉiuj Izraelidoj en ĉiuj iliaj marŝoj.

# Levidoj

**1** La Eternulo vokis Moseon, kaj ekparolis al li el
la tabernaklo de kunveno, dirante: 2 Parolu al la
Izraelidoj, kaj diru al ili: Se iu el vi volas alporti oferon
al la Eternulo, el la brutoj, el la bovoj, kaj el la ŝafoj
alportu vian oferon. 3 Se lia ofero estas brulofero el
bovoj, li oferu virseksulon sendifektan; al la pordo
de la tabernaklo de kunveno li alkonduku ĝin, por
favorigi al si la Eternulon. 4 Kaj li metu sian manon
sur la kapon de la brulofero, kaj li akiros favoron
kaj pekpardonon. 5 Kaj li buĉu la bovidon antaŭ la
Eternulo; kaj la filoj de Aaron, la pastroj, alportu la
sangon kaj aspergu per la sango ĉirkaŭe la altaron,
kiu estas ĉe la pordo de la tabernaklo de kunveno.
6 Kaj oni senfeligu la bruloferon kaj dishaku ĝin en
pecojn. 7 Kaj la filoj de la pastro Aaron metu fajron
sur la altaron kaj metu lignon sur la fajron. 8 Kaj la
filoj de Aaron, la pastroj, metu la pecojn, la kapon, kaj
la grason, sur la lignon, kiu estas sur la fajro sur la
altaro. 9 Kaj la internaĵon kaj la krurojn oni lavu per
akvo; kaj la pastro forbruligu ĉion sur la altaro kiel
bruloferon; ĝi estas fajrofero, agrabla odoraĵo al la
Eternulo. 10 Kaj se lia ofero estas el la malgrandaj
brutoj, el la ŝafoj aŭ el la kaproj, brulofero, li alportu
ĝin virseksan, sendifektan. 11 Kaj li buĉu ĝin sur la
norda flanko de la altaro antaŭ la Eternulo; kaj la
filoj de Aaron, la pastroj, aspergu per ĝia sango la
altaron ĉirkaŭe. 12 Kaj oni dishaku ĝin en pecojn,
apartiginte la kapon kaj la grason, kaj la pastro metu
ilin sur la lignon, kiu estas sur la fajro sur la altaro.
13 Kaj la internaĵon kaj la krurojn oni lavu per akvo;
kaj la pastro ĉion alportu kaj forbruligu sur la altaro
kiel bruloferon; ĝi estas fajrofero, agrabla odoraĵo al
la Eternulo. 14 Kaj se el la birdoj estas lia brulofero
al la Eternulo, li alportu sian oferon el turtoj aŭ el
kolombidoj. 15 Kaj la pastro alportu ĝin al la altaro kaj
fortordu ĝian kapon kaj forbruligu ĝin sur la altaro
kaj elfluigu ĝian sangon super la muro de la altaro.
16 Kaj ĝian kropon kun ĝiaj plumoj li forigu kaj ĵetu
ĝin apud la altaron sur la orientan flankon en la
cindrejon. 17 Kaj li disfendu ĝiajn flugilojn, sed ne
derompu; kaj la pastro forbruligu ĝin sur la altaro,
sur la ligno, kiu estas sur la fajro; ĝi estas brulofero,
fajrofero, agrabla odoraĵo al la Eternulo.

**2** Se iu alportos farunoferon al la Eternulo, lia ofero
estu el delikata faruno, kaj li verŝu sur ĝin oleon
kaj metu sur ĝin olibanon. 2 Kaj li alportu ĝin al la
filoj de Aaron, la pastroj; kaj la pastro prenu el ĝi
plenmanon el la faruno kun la oleo kaj kun la olibano,
kaj li ekbruligu tiun parton promemoran sur la altaro;
ĝi estas fajrofero, agrabla odoraĵo al la Eternulo. 3
Kaj la restaĵo el la farunofero estu por Aaron kaj
por liaj filoj; plejsanktaĵo ĝi estas el la fajroferoj de
la Eternulo. 4 Se vi alportos farunoferon el io, kio
estas bakita en forno, ĝi estu macokukoj el plej bona
faruno, miksitaj kun oleo, kaj macoflanoj, ŝmiritaj
per oleo. 5 Kaj se via ofero estos farunofero farita
sur pato, ĝi estu el delikata faruno, miksita kun oleo,
ne fermentinta. 6 Dispecigu ĝin kaj verŝu sur ĝin
oleon; ĝi estas farunofero. 7 Kaj se via ofero estos
farunofero el kaserolo, ĝi estu farita el delikata faruno
kun oleo. 8 Kaj alportu la farunoferon, kiu estas farita
el ĝi, al la Eternulo, kaj prezentu ĝin al la pastro,
kaj li alportu ĝin al la altaro. 9 Kaj la pastro prenos
el la farunofero la parton promemoran kaj bruligos
ĝin sur la altaro; ĝi estas fajrofero, agrabla odoraĵo
al la Eternulo. 10 Kaj la restaĵo el la farunofero estu
por Aaron kaj por liaj filoj; ĝi estas plejsanktaĵo el la
fajroferoj de la Eternulo. 11 Nenia farunofero, kiun vi
alportos al la Eternulo, estu farita el fermentintaĵo;
ĉar nenion fermentintan kaj nenian mielon vi devas
bruligi kiel fajroferon al la Eternulo. 12 Kiel oferon
de unuaaĵoj vi povas alporti tion al la Eternulo, sed
sur la altaron ili ne venu kiel agrabla odoraĵo. 13 Kaj
ĉiun vian farunoferon salu per salo, kaj ne estigu vian
farunoferon sen salo de interligo de via Dio; kun ĉiu
via ofero alportu salon. 14 Se vi alportos al la Eternulo
farunoferon el la unuaj terproduktaĵoj, tiam spikojn,
rostitajn sur fajro, grajnaĵon el freŝaj grajnoj alportu
kiel farunoferon el viaj unuaj terproduktaĵoj. 15 Kaj
verŝu sur ĝin oleon kaj metu sur ĝin olibanon; ĝi estas
farunofero. 16 Kaj la pastro bruligos la promemoran
parton el ĝia grajnaĵo kaj el ĝia oleo kun ĝia tuta
olibano, kiel fajroferon al la Eternulo.

**3** Se lia ofero estas pacofero, se li alportas el la
grandaj brutoj, ĉu ĝi estas virseksa, ĉu virinseksa,
sendifektan li alportu ĝin antaŭ la Eternulon. 2 Kaj li
metu sian manon sur la kapon de sia ofero kaj buĉu
ĝin ĉe la pordo de la tabernaklo de kunveno; kaj la filoj
de Aaron, la pastroj, aspergu per la sango la altaron

ĉirkaŭe. 3 Kaj li alportu el la pacofero kiel fajroferon
al la Eternulo la sebon, kiu kovras la internaĵojn, kaj
la tutan sebon, kiu estas sur la internaĵoj, 4 kaj ambaŭ
renojn, kaj la sebon, kiu estas sur ili, kiu estas ĉe la
lumbo, kaj la reton sur la hepato, kune kun la renoj li
ĝin apartigu. 5 Kaj la filoj de Aaron forbruligu tion
sur la altaro, kune kun la brulofero, kiu estas sur la
ligno, sur la fajro; ĝi estas fajrofero, agrabla odoraĵo al
la Eternulo. 6 Kaj se el la malgrandaj brutoj estas lia
ofero, kiel pacofero al la Eternulo, ĉu ĝi estas virseksa,
ĉu virinseksa, sendifektan li ĝin alportu. 7 Se ŝafidon
li alportas kiel sian oferon, li alportu ĝin antaŭ la
Eternulon; 8 kaj li metu sian manon sur la kapon de sia
ofero, kaj li buĉu ĝin antaŭ la tabernaklo de kunveno;
kaj la filoj de Aaron aspergu per ĝia sango la altaron
ĉirkaŭe. 9 Kaj li alportu el la pacofero kiel fajroferon
al la Eternulo ĝian sebon, la tutan voston, detranĉitan
ĉe la sakro, kaj la sebon, kiu kovras la internaĵojn,
kaj la tutan sebon, kiu estas sur la internaĵoj, 10 kaj
ambaŭ renojn, kaj la sebon, kiu estas sur ili, kiu estas
ĉe la lumbo, kaj la reton sur la hepato, kune kun la
renoj li ĝin apartigu. 11 Kaj la pastro bruligu tion sur
la altaro; ĝi estas manĝaĵo, fajrofero al la Eternulo. 12
Kaj se lia ofero estas kapro, li alportu ĝin antaŭ la
Eternulon. 13 Kaj li metu sian manon sur ĝian kapon,
kaj li buĉu ĝin antaŭ la tabernaklo de kunveno; kaj
la filoj de Aaron aspergu per ĝia sango la altaron
ĉirkaŭe. 14 Kaj li alportu el ĝi ofere, kiel fajroferon al
la Eternulo, la sebon, kiu kovras la internaĵojn, kaj la
tutan sebon, kiu estas sur la internaĵoj, 15 kaj ambaŭ
renojn, kaj la sebon, kiu estas sur ili, kiu estas ĉe la
lumbo, kaj la reton sur la hepato, kune kun la renoj li
ĝin apartigu. 16 Kaj la pastro bruligu tion sur la altaro;
ĝi estas manĝaĵo, fajrofero, agrabla odoraĵo; la tuta
sebo estu por la Eternulo. 17 Ĝi estu eterna leĝo por
viaj generacioj en ĉiuj viaj loĝlokoj; sebon kaj sangon
neniam manĝu.

4 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2
Diru al la Izraelidoj jene: Se iu pekos per eraro
kontraŭ la ordonoj de la Eternulo, malpermesantaj
fari diversajn aferojn, kaj li faros iun el ili; 3 se pastro
sanktoleita pekos, ĵetante kulpon sur la popolon,
tiam li alportu pro sia peko, kiun li pekis, bovidon
sendifektan al la Eternulo, kiel oferon propekan. 4
Li venigu la bovidon al la pordo de la tabernaklo de
kunveno antaŭ la Eternulon, kaj li metu sian manon
sur la kapon de la bovido, kaj li buĉu la bovidon
antaŭ la Eternulo. 5 Kaj la sanktoleita pastro prenu
iom el la sango de la bovido kaj enportu ĝin en la
tabernaklon de kunveno. 6 Kaj la pastro trempu sian
fingron en la sango, kaj aspergu per la sango sepfoje
antaŭ la Eternulo, antaŭ la kurteno de la sanktejo.
7 Kaj la pastro metu iom el la sango sur la kornojn
de la altaro de bonodora incenso antaŭ la Eternulo
en la tabernaklo de kunveno, kaj la tutan ceteran
sangon de la bovido li elverŝu ĉe la bazo de la altaro
de bruloferoj, kiu estas ĉe la pordo de la tabernaklo
de kunveno. 8 Kaj la tutan sebon de la propeka bovido
li forlevu el ĝi, la sebon, kiu kovras la internaĵojn, kaj
la tutan sebon, kiu estas sur la internaĵoj, 9 kaj ambaŭ
renojn, kaj la sebon, kiu estas sur ili, kiu estas ĉe la
lumbo, kaj la reton sur la hepato, kune kun la renoj li
ĝin apartigu, 10 tiel same, kiel estas forlevata pacofero
el bovo; kaj la pastro bruligu tion sur la altaro de
bruloferoj. 11 Kaj la felon de la bovido kaj ĝian tutan
viandon kun ĝia kapo kaj kruroj kaj ĝiajn internaĵojn
kaj malpuraĵon, 12 la tutan bovidon li elportu ekster la
tendaron sur puran lokon, kien oni ŝutas la cindron,
kaj li forbruligu tion sur ligno per fajro; sur la cindrejo
tio estu forbruligata. 13 Kaj se la tuta komunumo
de la Izraelidoj pekos per eraro kaj la afero estos
kaŝita antaŭ la okuloj de la anaro, kaj ili faros iun el
la agoj, kiujn la Eternulo malpermesis, kaj ili fariĝos
kulpaj; 14 kaj ili sciiĝos pri la peko, kiun ili pekis: tiam
la anaro alportu bovidon kiel propekan oferon kaj
venigu ĝin antaŭ la tabernaklon de kunveno. 15 Kaj la
plejaĝuloj de la komunumo metu siajn manojn sur la
kapon de la bovido antaŭ la Eternulo, kaj oni buĉu
la bovidon antaŭ la Eternulo. 16 Kaj la sanktoleita
pastro enportu iom el la sango de la bovido en la
tabernaklon de kunveno. 17 Kaj la pastro trempu sian
fingron en la sango, kaj aspergu sep fojojn antaŭ la
Eternulo, antaŭ la kurteno. 18 Kaj iom el la sango li
metu sur la kornojn de la altaro, kiu estas antaŭ la
Eternulo en la tabernaklo de kunveno, kaj la tutan
ceteran sangon li elverŝu ĉe la bazo de la altaro de
bruloferoj, kiu estas ĉe la pordo de la tabernaklo de
kunveno. 19 Kaj ĝian tutan sebon li forlevu el ĝi kaj
bruligu sur la altaro. 20 Kaj li faru kun la bovido; kiel
li faris kun la propeka bovido, tiel li faru kun ĝi; kaj
pekliberigos ilin la pastro, kaj estos pardonite al ili.
21 Kaj li elportu la bovidon ekster la tendaron, kaj
forbruligu ĝin, kiel li forbruligis la unuan bovidon; ĝi

estas propeka ofero de la komunumo. 22 Se princo
pekos, kaj per eraro faros iun el la agoj, kiujn la
Eternulo, lia Dio, malpermesis fari, kaj li fariĝos kulpa;
23 kaj li sciiĝos pri sia peko, kiun li pekis: tiam li
alportu kiel sian oferon virkapron sendifektan. 24 Kaj
li metu sian manon sur la kapon de la kapro, kaj buĉu
ĝin sur la loko, sur kiu estas buĉataj bruloferoj antaŭ
la Eternulo; ĝi estas propeka ofero. 25 Kaj la pastro
prenos iom el la sango de la propeka ofero per sia
fingro, kaj li metos ĝin sur la kornojn de la altaro de
bruloferoj, kaj la ceteran sangon li elverŝos ĉe la bazo
de la altaro de bruloferoj. 26 Kaj ĝian tutan sebon li
bruligos sur la altaro, kiel la sebon de pacofero; kaj la
pastro liberigos lin de lia peko, kaj estos pardonite al
li. 27 Se iu el la popolo per eraro pekos, farante iun el
la agoj, kiujn la Eternulo malpermesis, kaj li fariĝos
kulpa; 28 kaj li sciiĝos pri sia peko, kiun li pekis: tiam
li alportu kiel sian oferon kaprinon sendifektan pro
sia peko, kiun li pekis. 29 Kaj li metu sian manon sur
la kapon de la propeka ofero, kaj li buĉu la propekan
oferon sur la loko de la bruloferoj. 30 Kaj la pastro
prenos iom el ĝia sango per sia fingro kaj metos sur
la kornojn de la altaro de bruloferoj, kaj la tutan
ceteran sangon li elverŝos ĉe la bazo de la altaro. 31
Kaj ĝian tutan sebon li apartigos, kiel estas apartigata
la sebo de la pacoferoj, kaj la pastro bruligos ĝin sur
la altaro, kiel agrablan odoraĵon al la Eternulo; kaj la
pastro pekliberigos lin, kaj estos pardonite al li. 32 Se
ŝafon li alportos kiel sian propekan oferon, li alportu
virinseksan, sendifektan. 33 Kaj li metu sian manon
sur la kapon de la propeka ofero, kaj buĉu ĝin kiel
propekan oferon sur la loko, kie oni buĉas bruloferon.
34 Kaj la pastro prenos per sia fingro iom el la sango
de la propeka ofero kaj metos ĝin sur la kornojn de la
altaro de bruloferoj, kaj ĝian tutan ceteran sangon li
elverŝos ĉe la bazo de la altaro. 35 Kaj ĝian tutan sebon
li apartigos, kiel estas apartigata la sebo de la ŝafo el
la pacoferoj, kaj la pastro bruligos ĝin sur la altaro
kun la fajroferoj al la Eternulo; kaj la pastro liberigos
lin de la peko, kiun li pekis, kaj estos pardonite al li.

**5** Se iu pekos per tio, ke li aŭdos ĵuron kaj estos
atestanto, aŭ ke li vidos aŭ scios, sed ne sciigos kaj
portos sur si la pekon; 2 aŭ se iu ektuŝos ion malpuran,
aŭ kadavraĵon de malpura besto, aŭ kadavraĵon de
malpura bruto, aŭ kadavraĵon de malpura rampaĵo,
kaj li tion ne scios, kaj li malpuriĝos kaj kulpiĝos; 3
aŭ se iu ektuŝos malpuraĵon de homo, kia ajn estus
tiu malpuraĵo, per kiu oni malpuriĝas, kaj li tion ne
scios, kaj poste li sciiĝos, kaj li estos kulpa; 4 aŭ se
iu per nesingarda buŝo ĵuros fari ion malbonan aŭ
bonan, kion ajn homo elesprimas per ĵuro, kaj li tion
ne rimarkos, kaj poste li sciiĝos, kaj li estos kulpa
pri io el tiuj aferoj: 5 se iu estos kulpa pri io el tiuj
aferoj, li faru konfeson pri tio, kion li pekis; 6 kaj pro
sia peko, kiun li pekis, li alportu al la Eternulo kiel
propekan oferon inon el la malgrandaj brutoj, ŝafinon
aŭ kaprinon; kaj la pastro liberigos lin de lia peko. 7
Kaj se li ne estos sufiĉe bonstata, por alporti ŝafinon,
li alportu pro sia peko, kiun li pekis, du turtojn aŭ du
kolombidojn al la Eternulo, unu kiel propekan oferon,
la duan kiel bruloferon. 8 Li alportu ilin al la pastro,
kaj ĉi tiu prezentos antaŭe tiun, kiu estos propeka
ofero, kaj li tordorompos ĝian kapon ĉe la nuko, sed
ne apartigos ĝin; 9 kaj li aspergos per la sango de la
propeka ofero la muron de la altaro, kaj la restintan
sangon li elpremos ĉe la bazo de la altaro; tio estas
propeka ofero. 10 Kaj el la dua li faros bruloferon
laŭ la reguloj; kaj la pastro liberigos lin de la peko,
kiun li pekis, kaj estos pardonite al li. 11 Se li ne
estos sufiĉe bonstata, por alporti du turtojn aŭ du
kolombidojn, tiam li alportu kiel oferon pro sia peko
dekonon de efo da delikata faruno, kiel propekan
oferon; li ne verŝu sur ĝin oleon kaj ne metu sur ĝin
olibanon, ĉar ĝi estas propeka ofero. 12 Kaj li alportu
ĝin al la pastro, kaj la pastro prenos el ĝi plenmanon
kiel memorparton kaj bruligos sur la altaro kun la
fajroferoj al la Eternulo; ĝi estas propeka ofero. 13
Kaj la pastro liberigos lin de lia peko, kiun li pekis
koncerne iun el tiuj aferoj, kaj estos pardonite al
li; la restaĵo estu por la pastro, kiel farunofero. 14
Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 15 Se iu
kulpiĝos, pekante per eraro kontraŭ la sanktaĵoj de la
Eternulo, tiam li alportu kiel prokulpan oferon al la
Eternulo virŝafon sendifektan el la malgrandaj brutoj,
havantan laŭ via taksado la valoron de du sikloj, laŭ
la sankta siklo; ĝi estu prokulpa ofero. 16 Kaj pro la
sanktaĵo, kontraŭ kiu li pekis, li pagu, kaj li aldonu
kvinonon de ĝia valoro kaj donu tion al la pastro; kaj
la pastro pekliberigos lin per la prokulpa virŝafo, kaj
estos pardonite al li. 17 Kaj se iu pekos, farante iun el
tiuj aferoj, kiujn la Eternulo malpermesis, sed li ne
sciis kaj fariĝis kulpa, kaj li portos sur si sian pekon: 18
tiam li alportu virŝafon sendifektan el la malgrandaj

brutoj, laŭ via taksado, kiel kulpoferon al la pastro;
kaj la pastro pekliberigos lin koncerne lian eraron,
kiun li faris ne sciante, kaj estos pardonite al li. 19 Ĝi
estas prokulpa ofero; li kulpiĝis antaŭ la Eternulo.

6 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2 Se
iu pekos kaj krimos antaŭ la Eternulo, neante al
sia proksimulo koncerne konfiditaĵon aŭ deponitaĵon
aŭ rabitaĵon, aŭ se li trompe forprenos ion de sia
proksimulo, 3 aŭ se li trovos perditaĵon kaj neos tion,
aŭ se li ĵuros mensoge pri io, kion homo faras, kaj per
tio pekas: 4 tiam, se li pekis kaj kulpiĝis, li redonu
la rabitaĵon, kiun li rabis, aŭ tion, kion li trompe
forprenis, aŭ la deponitaĵon, kiu estis deponita ĉe
li, aŭ la perditaĵon, kiun li trovis; 5 aŭ ĉion, pri kio
li mensoge ĵuris, li repagu per ĝia plena valoro kaj
aldonu plie kvinonon de ĝi; al tiu, kies tio estas, li
donu ĝin en la tago, kiam li alportas sian kulpoferon.
6 Kaj kiel sian kulpoferon li alportu al la Eternulo
sendifektan virŝafon el la malgrandaj brutoj, laŭ via
taksado, kiel kulpoferon, por la pastro. 7 Kaj la pastro
pekliberigos lin antaŭ la Eternulo, kaj estos pardonite
al li pri ĉio, kion li faris kaj per kio li kulpiĝis. 8 Kaj
la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 9 Ordonu
al Aaron kaj al liaj filoj, dirante: Jen estas la leĝo
pri la brulofero: la brulofero restu sur la fajrujo
sur la altaro dum tuta nokto, ĝis la mateno, kaj la
fajro de la altaro restu brulanta sur ĝi. 10 Kaj la
pastro metu sur sin sian linan veston, kaj siajn linajn
pantalonojn li surmetu sur sian korpon, kaj li deprenu
la cindron, kiun la fajro elbruligis el la brulofero sur
la altaro, kaj li metu ĝin apud la altaron. 11 Kaj li
demetu siajn vestojn kaj metu sur sin aliajn vestojn
kaj elportu la cindron ekster la tendaron sur puran
lokon. 12 Kaj la fajro sur la altaro restu brulanta sur ĝi
kaj ne estingiĝu; kaj la pastro bruligu sur ĝi lignon
ĉiumatene, kaj aranĝu sur ĝi la bruloferon kaj bruligu
sur ĝi la sebon de la pacoferoj. 13 Eterna fajro brulu
sur la altaro, ne estingiĝu. 14 Kaj jen estas la leĝo
pri la farunofero: la filoj de Aaron alportu ĝin antaŭ
la Eternulon sur la antaŭan parton de la altaro. 15
Kaj la pastro prenu el ĝi plenmanon el la delikata
faruno de la farunofero kaj el ĝia oleo, kaj la tutan
olibanon, kiu estas sur la farunofero, kaj li bruligu
sur la altaro kiel agrablan odoraĵon, memoraĵon al la
Eternulo. 16 Kaj la restaĵon el ĝi manĝu Aaron kaj liaj
filoj; senfermente ili ĝin manĝu sur sankta loko, sur
la korto de la tabernaklo de kunveno ili ĝin manĝu.
17 Ĝi ne estu bakata fermentinte; kiel ilian parton
Mi donis ĝin el Miaj fajroferoj; ĝi estas plejsanktaĵo,
simile al pekofero kaj kulpofero. 18 Ĉiu virseksulo el la
Aaronidoj povas ĝin manĝi kiel eternan destinitaĵon
en viaj generacioj el la fajroferoj de la Eternulo; ĉiu,
kiu ektuŝos ilin, devos esti sankta. 19 Kaj la Eternulo
ekparolis al Moseo, dirante: 20 Jen estas la ofero de
Aaron kaj liaj filoj, kiun ili alportos al la Eternulo
en la tago de sia sanktoleateco: dekono de efo da
delikata faruno kiel konstanta farunofero, unu duono
matene kaj la dua duono vespere. 21 Sur pato kun
oleo ĝi devas esti preparita; bone bakitan alportu ĝin;
en formo de dispecigita farunofero alportu ĝin kiel
agrablan odoraĵon al la Eternulo. 22 Kaj la pastro, kiu
el liaj filoj estos sanktoleita anstataŭ li, plenumos
tion; ĝi estu eterna leĝo antaŭ la Eternulo; ĝi tuta
devas esti forbruligata. 23 Kaj ĉiu farunofero de pastro
estu forbruligata tuta; ĝi ne estu manĝata. 24 Kaj la
Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 25 Diru al Aaron
kaj al liaj filoj jene: Jen estas la leĝo pri la pekofero:
sur tiu loko, sur kiu estas buĉata la brulofero, oni
buĉu la pekoferon antaŭ la Eternulo; plejsanktaĵo
ĝi estas. 26 La pastro, kiu plenumas la pekoferon,
manĝu ĝin; sur sankta loko ĝi estu manĝata, sur la
korto de la tabernaklo de kunveno. 27 Ĉiu, kiu ektuŝos
ĝian viandon, devas esti sankta; kaj se iu aspergos
per ĝia sango la veston, li lavu la aspergitan pecon
sur sankta loko. 28 Kaj la argilan vazon, en kiu ĝi
estis kuirita, oni disrompu; kaj se ĝi estis kuirita
en kupra vazo, oni purigu ĉi tiun kaj lavu ĝin per
akvo. 29 Ĉiu virseksulo el la pastroj povas ĝin manĝi;
ĝi estas plejsanktaĵo. 30 Sed ĉiu pekofero, el kies
sango oni enportos en la tabernaklon de kunveno por
pekliberigo en la sanktejo, ne estu manĝata: per fajro
oni ĝin forbruligu.

7 Kaj jen estas la leĝo pri la kulpofero: plejsanktaĵo
ĝi estas. 2 Sur la loko, sur kiu estas buĉata la
brulofero, oni buĉu la kulpoferon, kaj per ĝia sango
oni aspergu la altaron ĉirkaŭe. 3 Kaj ĝian tutan sebon
oni alportu el ĝi ofere, la voston, kaj la sebon, kiu
kovras la internaĵojn, 4 kaj ambaŭ renojn, kaj la sebon,
kiu estas sur ili, kiu estas ĉe la lumbo, kaj la reton
sur la hepato, kune kun la renoj oni ĝin apartigu. 5
Kaj la pastro bruligu ilin sur la altaro kiel fajroferon
al la Eternulo; ĝi estas kulpofero. 6 Ĉiu virseksulo el

la pastroj povas ĝin manĝi; sur sankta loko ĝi estu
manĝata; ĝi estas plejsanktaĵo. 7 Kiel por la pekofero,
tiel ankaŭ por la kulpofero estu la sama leĝo; al la
pastro, kiu pekliberigas per ĝi, al li ĝi apartenu. 8 Al
la pastro, kiu plenumas ies bruloferon, al tiu pastro
apartenu la felo de la brulofero, kiun li plenumis. 9 Kaj
ĉiu farunofero, kiu estas bakita en forno aŭ pretigita
en kaserolo aŭ sur pato, apartenu al la pastro, kiu
prezentis ĝin. 10 Kaj ĉiu farunofero, miksita kun oleo
aŭ seka, apartenu al ĉiuj Aaronidoj, al ĉiuj egale. 11 Kaj
jen estas la leĝo pri la pacofero, kiu estas alportata al
la Eternulo: 12 se iu ĝin alportas kiel dankon, li alportu
kun la danka ofero nefermentintajn kukojn, miksitajn
kun oleo, kaj nefermentintajn flanojn, ŝmiritajn per
oleo, kaj el delikata faruno kukojn frititajn, miksitajn
kun oleo. 13 Kune kun kukoj el pano fermentinta li
alportu sian oferon, ĉe sia danka pacofero. 14 Kaj li
alportu unu el ili, el ĉiu ofero, kiel oferdonon al la
Eternulo; al la pastro, kiu aspergas la sangon de la
pacofero, ĝi apartenu. 15 Kaj la viando de la danka
pacofero estu manĝata en la tago de la oferado; oni
ne devas restigi iom el ĝi ĝis la mateno. 16 Sed se
lia ofero estas sankta promeso aŭ memvola ofero, ĝi
estu manĝata en la tago de la alportado de la ofero;
kaj ankaŭ en la sekvanta tago oni povas manĝi tion,
kio restis el ĝi. 17 Kaj kio restis el la viando de la
ofero ĝis la tria tago, tio estu forbruligata per fajro. 18
Se iu manĝos el la viando de sia pacofero en la tria
tago, ĝi ne akiros plaĉon; kiu alportos ĝin, al tiu ĝi ne
estos kalkulata; ĝi estos abomenindaĵo, kaj kiu ĝin
manĝos, tiu havos pekon. 19 La viando, kiu ektuŝis ion
malpuran, ne estu manĝata, oni ĝin forbruligu per
fajro. La ceteran viandon povas manĝi ĉiu purulo. 20
Se iu, havante sur si malpuraĵon, manĝos viandon el
la pacofero, kiu estis destinita por la Eternulo, ties
animo ekstermiĝos el sia popolo. 21 Se iu ektuŝos
ion malpuran, ĉu malpuraĵon de homo, ĉu malpuran
beston, ĉu ian malpuran abomenindaĵon, kaj manĝos
el la viando de pacofero, kiu estis destinita por la
Eternulo, ties animo ekstermiĝos el sia popolo. 22 Kaj
la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 23 Diru al la
Izraelidoj jene: Sebon de bovo kaj de ŝafo kaj de kapro
neniam manĝu. 24 La sebon de kadavraĵo kaj la sebon
de besto disŝirita oni povas uzi por ĉia laboro, sed
manĝi ĝin vi ne devas. 25 Ĉar ĉiu, kiu manĝos sebon
de brutoj, el kiuj oni alportas fajroferon al la Eternulo,
la manĝinto ekstermiĝos el sia popolo. 26 Kaj nenian
sangon manĝu en ĉiuj viaj loĝejoj, nek el birdoj, nek
el brutoj. 27 Ĉiu, kiu manĝos ian sangon, ekstermiĝos
el sia popolo. 28 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo,
dirante: 29 Diru al la Izraelidoj jene: Kiu alportas
sian pacoferon al la Eternulo, tiu alportu mem al
la Eternulo tion, kio apartenas el liaj pacoferoj; 30
propramane li alportu la fajroferon al la Eternulo; la
sebon kune kun la brustaĵo li alportu; la brustaĵon,
por skui ĝin kiel skuoferon antaŭ la Eternulo. 31 Kaj la
pastro bruligos la sebon sur la altaro, kaj la brustaĵo
estos por Aaron kaj por liaj filoj. 32 Kaj la dekstran
femuron el viaj pacoferoj donu kiel levoferon al la
pastro. 33 Kiu el la Aaronidoj alportas la sangon de
la pacoferoj kaj la sebon, al tiu apartenu la dekstra
femuro kiel lia parto: 34 ĉar la brustaĵon-skuoferon
kaj la femuron-levoferon Mi prenis de la Izraelidoj el
iliaj pacoferoj, kaj Mi donis ilin al la pastro Aaron kaj
al liaj filoj kiel eternan destinitaĵon de la flanko de la
Izraelidoj. 35 Tio estas la sankta parto de Aaron kaj la
sankta parto de liaj filoj el la fajroferoj de la Eternulo
de post la tago, en kiu ili estis aligitaj, por esti pastroj
al la Eternulo, 36 parto, kiun la Eternulo ordonis doni
al ili de la Izraelidoj en la tago, en kiu Li sanktoleis
ilin. Tio estas eterna leĝo en iliaj generacioj. 37 Tio
estas la leĝo pri la brulofero, pri la farunofero, pri la
pekofero, pri la kulpofero, pri la ofero de konsekro,
kaj pri la pacofero; 38 kiun la Eternulo donis al Moseo
sur la monto Sinaj, kiam Li ordonis al la Izraelidoj en
la dezerto Sinaja, ke ili alportadu siajn oferojn al la
Eternulo.

**8** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2 Prenu
Aaronon kaj liajn filojn kune kun li kaj la vestojn
kaj la sanktan oleon kaj bovidon por pekofero kaj
du virŝafojn kaj korbon da macoj. 3 Kaj la tutan
komunumon kunvenigu ĉe la eniro de la tabernaklo
de kunveno. 4 Kaj Moseo faris, kiel la Eternulo al
li ordonis; kaj la komunumo kolektiĝis ĉe la eniro
de la tabernaklo de kunveno. 5 Kaj Moseo diris al la
komunumo: Jen estas tio, kion la Eternulo ordonis
fari. 6 Kaj Moseo alvenigis Aaronon kaj liajn filojn, kaj
li lavis ilin per akvo. 7 Kaj li metis sur lin la ĥitonon
kaj zonis lin per zono kaj vestis lin per la tuniko kaj
metis sur lin la efodon kaj zonis lin per la zono de la
efodo kaj alfortikigis per ĝi la efodon sur li. 8 Kaj li
metis sur lin la surbrustaĵon, kaj sur la surbrustaĵon la
signojn de lumo kaj de justo. 9 Kaj li metis la cidaron

sur lian kapon, kaj sur la cidaron sur la antaŭa flanko
li metis la oran tabuleton, la sanktan kronon, kiel la
Eternulo ordonis al Moseo. **10** Kaj Moseo prenis la
sanktan oleon, kaj sanktoleis la tabernaklon, kaj ĉion,
kio estis en ĝi, kaj li sanktigis ilin. **11** Kaj li aspergis
per tio la altaron sep fojojn, kaj li sankteŝmiris la
altaron kaj ĉiujn ĝiajn apartenaĵojn, kaj la lavujon
kaj ĝian piedestalon, por sanktigi ilin. **12** Kaj li verŝis
iom el la sankta oleo sur la kapon de Aaron, kaj li
ŝmiris lin, por sanktigi lin. **13** Kaj Moseo alvenigis la
filojn de Aaron kaj vestis ilin per ĥitonoj kaj zonis ilin
per zonoj kaj alligis sur ili mitrojn, kiel la Eternulo
ordonis al Moseo. **14** Kaj li alkondukis la propekan
bovidon, kaj Aaron kaj liaj filoj metis siajn manojn sur
la kapon de la propeka bovido. **15** Kaj Moseo ĝin buĉis,
kaj li prenis iom el la sango kaj metis per sia fingro
sur la kornojn de la altaro ĉirkaŭe kaj pekliberigis la
altaron; kaj la ceteran sangon li elverŝis ĉe la bazo de
la altaro, kaj sanktigis ĉi tiun, por pekliberigi ĝin. **16**
Kaj li prenis la tutan sebon, kiu estis sur la internaĵoj,
kaj la reton de la hepato, kaj ambaŭ renojn kaj ilian
sebon, kaj Moseo bruligis tion sur la altaro. **17** Kaj
la bovidon kaj ĝian felon kaj ĝian karnon kaj ĝian
malpuraĵon li forbruligis per fajro ekster la tendaro,
kiel la Eternulo ordonis al Moseo. **18** Kaj li alkondukis
la virŝafon de brulofero; kaj Aaron kaj liaj filoj metis
siajn manojn sur la kapon de la virŝafo. **19** Kaj Moseo
ĝin buĉis, kaj aspergis per la sango la altaron ĉirkaŭe.
**20** Kaj la virŝafon li dishakis en partojn, kaj Moseo
ekbruligis la kapon kaj la partojn kaj la grason. **21**
La internaĵojn kaj la krurojn li lavis per akvo; kaj
Moseo forbruligis la tutan ŝafon sur la altaro; ĝi estis
brulofero por agrabla odoraĵo, fajrofero al la Eternulo,
kiel la Eternulo ordonis al Moseo. **22** Kaj li alkondukis
la duan virŝafon, la virŝafon de konsekrado; kaj Aaron
kaj liaj filoj metis siajn manojn sur la kapon de la
virŝafo. **23** Kaj li ĝin buĉis, kaj Moseo prenis iom el ĝia
sango kaj metis sur la malsupran randon de la dekstra
orelo de Aaron kaj sur la dikan fingron de lia dekstra
mano kaj sur la dikan fingron de lia dekstra piedo.
**24** Kaj li alkondukis la filojn de Aaron, kaj Moseo
metis iom el la sango sur la malsupran randon de ilia
dekstra orelo kaj sur la dikan fingron de ilia dekstra
mano kaj sur la dikan fingron de ilia dekstra piedo;
kaj Moseo aspergis per la sango la altaron ĉirkaŭe. **25**
Kaj li prenis la sebon kaj la voston, kaj la tutan sebon,
kiu estis sur la internaĵoj, kaj la reton de la hepato,
kaj ambaŭ renojn kaj ilian sebon, kaj la dekstran
femuron. **26** Kaj el la korbo da macoj, kiu estis antaŭ
la Eternulo, li prenis unu macan kukon kaj unu kukon
kun oleo kaj unu flanon, kaj metis ilin sur la sebojn
kaj sur la dekstran femuron. **27** Kaj li metis ĉion ĉi tion
sur la manojn de Aaron kaj sur la manojn de liaj filoj,
kaj li skuis tion kiel skuoferon antaŭ la Eternulo. **28**
Kaj Moseo prenis tion for de iliaj manoj kaj ekbruligis
sur la altaro kune kun la brulofero: tio estis ofero de
konsekrado, por agrabla odoraĵo; ĝi estis fajrofero al
la Eternulo. **29** Kaj Moseo prenis la brustaĵon kaj skuis
ĝin kiel skuoferon antaŭ la Eternulo: de la ŝafo de
konsekrado ĝi estis la destinita parto por Moseo, kiel
la Eternulo ordonis al Moseo. **30** Kaj Moseo prenis
iom el la sankta oleo, kaj el la sango, kiu estis sur
la altaro, kaj aspergis Aaronon, liajn vestojn, liajn
filojn, kaj la vestojn de liaj filoj kune kun li; kaj li
sanktigis Aaronon, liajn vestojn, liajn filojn, kaj la
vestojn de liaj filoj kune kun li. **31** Kaj Moseo diris al
Aaron kaj al liaj filoj: Kuiru la viandon ĉe la pordo
de la tabernaklo de kunveno; kaj tie manĝu ĝin, kaj
ankaŭ la panon, kiu estas en la korbo de konsekrado,
kiel mi ordonis, dirante: Aaron kaj liaj filoj ĝin manĝu.
**32** Kaj la restaĵon el la viando kaj el la pano forbruligu
per fajro. **33** Kaj for de la pordo de la tabernaklo de
kunveno ne foriru dum sep tagoj, ĝis la tago, en kiu
finiĝos la tempo de via konsekrado; ĉar sep tagojn
daŭros via konsekrado. **34** Kiel estis farite hodiaŭ, tiel
la Eternulo ordonis fari, por pekliberigi vin. **35** Kaj ĉe
la pordo de la tabernaklo de kunveno restu tage kaj
nokte dum sep tagoj, kaj vi observos la servadon al la
Eternulo, por ke vi ne mortu; ĉar tiel estas ordonite
al mi. **36** Kaj Aaron kaj liaj filoj faris ĉion, kion la
Eternulo ordonis per Moseo.

**9** En la oka tago Moseo vokis Aaronon kaj liajn
filojn kaj la plejaĝulojn de Izrael. **2** Kaj li diris al
Aaron: Prenu al vi junan bovidon por pekofero kaj
virŝafon por brulofero, sendifektajn, kaj alkonduku
ilin antaŭ la Eternulon. **3** Kaj al la Izraelidoj diru jene:
Prenu virkapron por propeka ofero, kaj bovidon kaj
ŝafidon jaraĝajn, sendifektajn, por brulofero, **4** kaj
virbovon kaj virŝafon por pacofero, por fari oferon
antaŭ la Eternulo, kaj farunoferon, miksitan kun
oleo; ĉar hodiaŭ la Eternulo aperos antaŭ vi. **5** Kaj ili
alportis tion, kion ordonis Moseo, antaŭ la pordon
de la tabernaklo de kunveno; kaj la tuta komunumo

alproksimiĝis kaj stariĝis antaŭ la Eternulo. 6 Kaj
Moseo diris: Jen estas tio, kion la Eternulo ordonis;
faru, kaj tiam aperos antaŭ vi la majesto de la Eternulo.
7 Kaj Moseo diris al Aaron: Aliru al la altaro, kaj faru
vian pekoferon kaj vian bruloferon kaj pekliberigu
vin kaj la popolon, kaj faru la oferon de la popolo kaj
pekliberigu ilin, kiel ordonis la Eternulo. 8 Kaj Aaron
aliris al la altaro, kaj buĉis la bovidon, kiu estis lia
propeka ofero. 9 Kaj la filoj de Aaron alportis al li la
sangon, kaj li trempis sian fingron en la sango kaj
ŝmiris la kornojn de la altaro, kaj la ceteran sangon li
elverŝis ĉe la bazo de la altaro. 10 Sed la sebon kaj
la renojn kaj la reton de la hepato de la pekofero
li bruligis sur la altaro, kiel la Eternulo ordonis al
Moseo. 11 Kaj la karnon kaj la felon li forbruligis per
fajro ekster la tendaro. 12 Kaj li buĉis la bruloferon,
kaj la filoj de Aaron alportis al li la sangon, kaj li
aspergis per ĝi la altaron ĉirkaŭe. 13 Kaj la bruloferon
ili alportis al li dispecigitan kaj la kapon, kaj li bruligis
tion sur la altaro. 14 Kaj li lavis la internaĵojn kaj
la krurojn kaj bruligis tion kun la brulofero sur la
altaro. 15 Kaj li alportis la oferon de la popolo, kaj
li prenis la propekan kapron de la popolo, kaj buĉis
ĝin kaj faris el ĝi pekoferon kiel el la antaŭa. 16
Kaj li alportis la bruloferon kaj agis kun ĝi laŭ la
reguloj. 17 Kaj li alportis la farunoferon kaj prenis
el ĝi plenmanon kaj bruligis tion sur la altaro krom
la matena brulofero. 18 Kaj li buĉis la bovon kaj la
ŝafon kiel pacoferon de la popolo, kaj la filoj de Aaron
alportis al li la sangon, kaj li aspergis per ĝi la altaron
ĉirkaŭe; 19 kaj la sebojn de la bovo, kaj el la ŝafo la
voston kaj la kovrantan sebon kaj la renojn kaj la
reton de la hepato. 20 Kaj ili metis la sebojn sur la
brustaĵojn, kaj li ekbruligis la sebojn sur la altaro. 21
Kaj la brustaĵojn kaj la dekstran femuron Aaron skuis
kiel skuoferon antaŭ la Eternulo, kiel Moseo ordonis.
22 Kaj Aaron levis siajn manojn al la popolo kaj benis
ĝin; kaj li malsupreniris, plenuminte la pekoferon
kaj la bruloferon kaj la pacoferon. 23 Kaj Moseo kaj
Aaron eniris en la tabernaklon de kunveno kaj eliris
kaj benis la popolon. Kaj montriĝis la majesto de la
Eternulo al la tuta popolo. 24 Kaj eliris fajro el antaŭ la
Eternulo kaj konsumis sur la altaro la bruloferon kaj
la sebon; kaj la tuta popolo vidis, kaj ili ĝoje ekkriis
kaj falis vizaĝaltere.

10 Kaj Nadab kaj Abihu, la filoj de Aaron, prenis
ĉiu sian incensujon kaj metis en ĝin fajron kaj
metis sur ĝin incenson kaj alportis antaŭ la Eternulon
fajron fremdan, pri kiu Li ne ordonis al ili. 2 Tiam
eliris fajro el antaŭ la Eternulo kaj forbruligis ilin,
kaj ili mortis antaŭ la Eternulo. 3 Kaj Moseo diris
al Aaron: Jen pri ĉi tio parolis la Eternulo, kiam Li
diris: Per Miaj proksimuloj Mi sanktiĝos kaj antaŭ la
tuta popolo Mi majestiĝos. Kaj Aaron silentis. 4 Kaj
Moseo alvokis Miŝaelon kaj Elcafanon, filojn de Uziel,
onklo de Aaron, kaj li diris al ili: Aliru, elportu viajn
fratojn el la sanktejo ekster la tendaron. 5 Kaj ili aliris
kaj elportis ilin en iliaj ĥitonoj ekster la tendaron,
kiel diris Moseo. 6 Kaj Moseo diris al Aaron kaj al liaj
filoj Eleazar kaj Itamar: Viajn kapojn ne nudigu kaj
viajn vestojn ne disŝiru, por ke vi ne mortu kaj por
ke Li ne koleru la tutan komunumon; sed viaj fratoj,
la tuta domo de Izrael, priploru la brulon, kiun la
Eternulo ekbruligis. 7 Kaj el la pordo de la tabernaklo
de kunveno ne eliru, por ke vi ne mortu; ĉar la sankta
oleo de la Eternulo estas sur vi. Kaj ili agis laŭ la
vortoj de Moseo. 8 Kaj la Eternulo ekparolis al Aaron,
dirante: 9 Vinon kaj ebriigaĵon ne trinku, nek vi, nek
viaj filoj kun vi, kiam vi iras en la tabernaklon de
kunveno, por ke vi ne mortu. Tio estu eterna leĝo en
viaj generacioj. 10 Por ke vi diferencigu inter sanktaĵo
kaj ordinaraĵo kaj inter malpuraĵo kaj puraĵo; 11 kaj
por ke vi instruu al la Izraelidoj ĉiujn leĝojn, kiujn
eldiris al ili la Eternulo per Moseo. 12 Kaj Moseo diris
al Aaron, kaj al Eleazar kaj al Itamar, liaj restintaj
filoj: Prenu la farunoferon, kiu restis el la fajroferoj
de la Eternulo, kaj manĝu ĝin senfermente apud la
altaro; ĉar ĝi estas plejsanktaĵo. 13 Kaj manĝu ĝin
sur sankta loko; ĉar ĝi estas via destinitaĵo kaj la
destinitaĵo de viaj filoj el la fajroferoj de la Eternulo;
ĉar tiel estas ordonite al mi. 14 Kaj la brustaĵon de
skuado kaj la femuron de levado manĝu sur loko
pura, vi kaj viaj filoj kaj viaj filinoj kune kun vi; ĉar ili
estas donitaj kiel via destinitaĵo kaj destinitaĵo de viaj
filoj el la pacoferoj de la Izraelidoj. 15 La femuron de
levado kaj la brustaĵon de skuado ili alportu kun la
fajroferoj el la sebo, por skui tion kiel skuoferon antaŭ
la Eternulo; kaj tio estu por vi kaj por viaj filoj eterna
destinitaĵo, kiel ordonis la Eternulo. 16 Kaj la kapron
propekan Moseo serĉis, sed montriĝis, ke ĝi estas
forbruligita. Tiam li ekkoleris kontraŭ Eleazar kaj
kontraŭ Itamar, la restintaj filoj de Aaron, kaj li diris:

17 Kial vi ne manĝis la pekoferon sur loko sankta?
ĝi estas ja plejsanktaĵo, kaj ĝi estas donita al vi, por
forporti la pekon de la komunumo, por pekliberigi ilin
antaŭ la Eternulo. 18 Jen ĝia sango ne estas enportita
en la internon de la sanktejo; vi devis manĝi ĝin en
la sanktejo, kiel estas ordonite al mi. 19 Kaj Aaron
diris al Moseo: Jen hodiaŭ ili alportis sian pekoferon
kaj sian bruloferon antaŭ la Eternulon, kaj okazis al
mi tia afero; se mi manĝus hodiaŭ pekoferon, ĉu tio
plaĉus al la Eternulo? 20 Kaj Moseo tion aŭdis, kaj tio
plaĉis al li.

11 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo kaj al Aaron,
dirante al ili: 2 Diru al la Izraelidoj jene: Tio estas
la bestoj, kiujn vi povas manĝi el ĉiuj brutoj, kiuj estas
sur la tero: 3 ĉiun bruton, kiu havas disfenditajn hufojn
kaj distranĉan sulkon sur la hufoj kaj kiu remaĉas
maĉitaĵon, vi povas manĝi. 4 Nur ĉi tiujn ne manĝu el
la remaĉantaj maĉitaĵon kaj el la havantaj disfenditajn
hufojn: la kamelon, ĉar ĝi remaĉas maĉitaĵon, sed
disfenditajn hufojn ĝi ne havas, malpura ĝi estas por
vi; 5 kaj la hirakon, ĉar ĝi remaĉas maĉitaĵon, sed
disfenditajn hufojn ĝi ne havas, malpura ĝi estas por
vi; 6 kaj la leporon, ĉar ĝi remaĉas maĉitaĵon, sed
disfenditajn hufojn ĝi ne havas, malpura ĝi estas por
vi; 7 kaj la porkon, ĉar ĝi havas disfenditajn hufojn
kaj distranĉan sulkon sur la hufoj, sed ĝi ne remaĉas
maĉitaĵon, malpura ĝi estas por vi. 8 Ilian viandon
ne manĝu kaj iliajn kadavrojn ne tuŝu, malpuraj ili
estas por vi. 9 Jenajn vi povas manĝi el ĉiuj bestoj,
kiuj estas en la akvo: ĉiujn, kiuj havas naĝilojn kaj
skvamojn en la akvo, en la maroj, kaj en la riveroj, ilin
vi povas manĝi. 10 Sed ĉiuj, kiuj ne havas naĝilojn
kaj skvamojn, en la maroj kaj en la riveroj, el ĉio,
kio moviĝas en la akvo, kaj el ĉiuj estaĵoj, kiuj vivas
en la akvo, ili estas abomenindaĵo por vi; 11 kaj ili
estu abomenindaĵo por vi, ilian viandon ne manĝu
kaj iliajn kadavrojn abomenu. 12 Ĉio en la akvo, kio
ne havas naĝilojn kaj skvamojn, estas abomenindaĵo
por vi. 13 Kaj ĉi tiujn abomenu inter la birdoj, ili
ne estu manĝataj, ili estas abomenindaĵoj: la aglon
kaj la gipaeton kaj la pandionon 14 kaj la milvon
kaj la falkon kun ĝia speco, 15 ĉiun korvon kun ĝia
speco, 16 kaj la struton kaj la strigon kaj la mevon kaj
la akcipitron kun ĝia speco 17 kaj la noktuon kaj la
mergulon kaj la ibison 18 kaj la cignon kaj la pelikanon
kaj la perknopteron 19 kaj la cikonion kaj la ardeon
kun ĝia speco kaj la upupon kaj la vesperton. 20 Ĉio
moviĝanta, kio havas flugilojn kaj iras kvarpiede,
estas abomenindaĵo por vi. 21 Nur tiujn vi povas
manĝi el ĉiuj moviĝantoj, kiuj havas flugilojn kaj iras
kvarpiede: tiujn, kiuj havas genuojn super la kruroj,
por salti per ili sur la tero. 22 La jenajn el ili vi povas
manĝi: la akridon kun ĝia speco kaj la cikadon kun
ĝia speco kaj la grilon kun ĝia speco kaj la lokuston
kun ĝia speco. 23 Sed ĉiu alia moviĝanto, kiu havas
flugilojn kaj kvar piedojn, estas abomenindaĵo por vi.
24 Kaj per la jenaj vi fariĝos malpuraj; ĉiu, kiu ektuŝos
ilian kadavron, estos malpura ĝis la vespero; 25 kaj
ĉiu, kiu portos kadavraĵon de ili, lavu siajn vestojn,
kaj li estos malpura ĝis la vespero: 26 ĉiu bruto, kiu
havas disfenditajn hufojn, sed ne havas distranĉan
sulkon kaj ne remaĉas maĉitaĵon, estas malpura por
vi; ĉiu, kiu ektuŝos ilin, estos malpura. 27 Kaj el ĉiuj
bestoj kvarpiedaj ĉiuj, kiuj iras sur siaj plandoj, estas
malpuraj por vi; ĉiu, kiu ektuŝos ilian kadavron, estos
malpura ĝis la vespero. 28 Kaj kiu portos kadavraĵon
de ili, lavu siajn vestojn, kaj li estos malpura ĝis la
vespero: malpuraj ili estas por vi. 29 Kaj jen, kio estas
malpura por vi inter la rampaĵoj, kiuj rampas sur la
tero: la talpo kaj la muso kaj la lacerto kun ĝia speco
30 kaj la geko kaj la monitoro kaj la uromastiko kaj
la skinko kaj la ĥameleono. 31 Tiuj estas la malpuraj
por vi inter ĉiuj rampaĵoj; ĉiu, kiu ektuŝos ilin post
ilia morto, estos malpura ĝis la vespero. 32 Kaj ĉio,
sur kion falos io el ili malviva, estos malpura; ĉu
ĝi estos ia ligna vazo, ĉu vesto, ĉu felo, ĉu sako, ĉu
ia ilo, per kiu oni faras laboron — oni metu ĝin en
akvon, kaj ĝi estos malpura ĝis la vespero, kaj tiam
ĝi fariĝos pura. 33 Kaj se en ian argilan vazon io el
ili falos internen, tiam ĉio, kio estas interne, fariĝos
malpura; kaj la vazon rompu. 34 Ĉiu manĝaĵo, kiun oni
manĝas, se ŝprucos sur ĝin tia akvo, fariĝos malpura;
kaj ĉiu trinkaĵo, kiun oni trinkas, en tia vazo fariĝos
malpura. 35 Kaj ĉio, sur kion falos io el ilia kadavraĵo,
fariĝos malpura; se ĝi estos forno aŭ kaldrono, oni ĝin
disrompu; malpuraj ili estas kaj malpuraj ili estu por
vi. 36 Nur fonto kaj puto kaj akvejoj restos puraj. Kiu
ektuŝos ilian kadavraĵon, fariĝos malpura. 37 Kaj se io
el ilia kadavraĵo falos sur ian semeblan semon, kiu
estas semota, ĝi restos pura. 38 Sed se estos verŝita
akvo sur la semon kaj io el ilia kadavraĵo falos sur
ĝin, tiam ĝi estos malpura por vi. 39 Kaj se mortos ia
bruto el tiuj, kiujn vi uzas por manĝi, tiam tiu, kiu

ektuŝos ĝian kadavron, estos malpura ĝis la vespero.
40 Kaj tiu, kiu manĝos ion el ĝia kadavraĵo, lavu siajn
vestojn, kaj li estos malpura ĝis la vespero; kaj tiu, kiu
portos ĝian kadavron, lavu siajn vestojn, kaj li estos
malpura ĝis la vespero. 41 Ĉia rampaĵo, kiu rampas
sur la tero, estas abomenindaĵo, ĝi ne estu manĝata.
42 Ĉio, kio rampas sur la ventro, kaj ĉio, kio iras sur
kvar piedoj aŭ sur pli da piedoj, sed estas rampaĵo,
kiu rampas sur la tero — ilin ne manĝu, ĉar ili estas
abomenindaĵo. 43 Ne abomenindigu viajn animojn
per iaj bestoj rampantaj, kaj ne malpuriĝu per ili,
farante vin mem malpuraj. 44 Ĉar Mi, la Eternulo,
estas via Dio; tial sanktigu vin kaj estu sanktaj, ĉar Mi
estas sankta; kaj ne malpurigu viajn animojn per ia
rampaĵo, kiu rampas sur la tero. 45 Ĉar Mi estas la
Eternulo, kiu elkondukis vin el la lando Egipta, por
esti Dio por vi; estu do sanktaj, ĉar Mi estas sankta. 46
Tio estas la leĝo pri la brutoj kaj pri la birdoj, kaj pri
ĉiuj bestoj, moviĝantaj en la akvo, kaj pri ĉiuj bestoj,
kiuj rampas sur la tero, 47 por fari diferencon inter la
malpuraĵo kaj puraĵo, kaj inter la bestoj, kiujn oni
povas manĝi, kaj la bestoj, kiujn oni devas ne manĝi.

**12** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2 Diru
al la Izraelidoj jene: Se virino fruktigos semon
kaj naskos knabeton, tiam ŝi estos malpura dum sep
tagoj; kiel en la tagoj de sia monataĵa suferado ŝi
estos malpura. 3 Kaj en la oka tago oni cirkumcidu la
karnon de lia prepucio. 4 Tridek tri tagojn ŝi restu en
la sango de sia puriĝo; nenion sanktan ŝi tuŝu kaj en la
sanktejon ŝi ne venu, ĝis finiĝos la tagoj de ŝia puriĝo.
5 Se ŝi naskos knabineton, tiam ŝi estu malpura dum
du semajnoj kiel ĉe sia monataĵo, kaj sesdek ses tagojn
ŝi restu en la sango de sia puriĝo. 6 Kaj kiam finiĝos
la tagoj de ŝia puriĝo post filo aŭ filino, ŝi alportu
jaraĝan ŝafidon kiel bruloferon, kaj kolombidon aŭ
turton kiel pekoferon, al la pordo de la tabernaklo
de kunveno, al la pastro. 7 Kaj li tion alportos antaŭ
la Eternulon kaj pekliberigos ŝin, kaj ŝi puriĝos de
sia sangofluado. Tio estas la leĝo pri naskintino, ĉu
de knabo, ĉu de knabino. 8 Kaj se ŝi ne estas sufiĉe
bonstata, por alporti ŝafidon, tiam ŝi prenu du turtojn
aŭ du kolombidojn, unu kiel bruloferon kaj la duan
kiel pekoferon; kaj la pastro pekliberigos ŝin, kaj ŝi
puriĝos.

**13** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo kaj al Aaron,
dirante: 2 Se ĉe iu homo sur la haŭto de lia korpo
aperos ŝvelaĵo aŭ pustulo aŭ makulo tiamaniere, ke
sur la haŭto de lia korpo fariĝos kvazaŭ infektaĵo de
lepro, tiam oni alkonduku lin al la pastro Aaron aŭ al
unu el liaj filoj, la pastroj. 3 Kaj la pastro rigardos la
infektaĵon sur la haŭto de la korpo, kaj se li vidos, ke
la haroj sur la infektaĵo fariĝis blankaj kaj la infektaĵo
aspektas pli profunda ol la haŭto de lia korpo, tiam ĝi
estas infektaĵo de lepro; kaj la pastro ĝin pririgardos,
kaj deklaros, ke ĝi estas malpura. 4 Kaj se ĝi estos
blanka makulo sur la haŭto de lia korpo, sed ĝi ne
aspektos pli profunda ol la haŭto, kaj la haroj sur ĝi
ne fariĝis blankaj, tiam la pastro enŝlosu la infektiton
por sep tagoj. 5 Kaj la pastro rigardos lin en la sepa
tago, kaj se li vidos, ke la infektaĵo restis en la antaŭa
stato, kaj ke la infektaĵo ne disvastiĝis sur la haŭto,
tiam la pastro enŝlosu lin por pluaj sep tagoj. 6 Kaj
la pastro rigardos lin en la plua sepa tago, kaj se li
vidos, ke la infektaĵo fariĝis malpli rimarkebla kaj ĝi
ne disvastiĝis sur la haŭto, tiam la pastro deklaru lin
pura: ĝi estas likeno: li lavu siajn vestojn, kaj li estos
pura. 7 Sed se la likeno tre disvastiĝis sur la haŭto,
post kiam li montris sin al la pastro, ke tiu deklaru lin
pura, tiam li duan fojon devas sin montri al la pastro.
8 Kaj se la pastro vidos, ke la likeno disvastiĝis sur la
haŭto, tiam la pastro deklaros lin malpura: ĝi estas
lepro. 9 Se sur iu homo estos infektaĵo de lepro, oni
alkonduku lin al la pastro. 10 Kaj se la pastro vidos, ke
estas blanka ŝvelaĵo sur la haŭto kaj ke de ĝi la haroj
fariĝis blankaj kaj sur la ŝvelaĵo estas kruda karno, 11
tiam tio estas malnova lepro sur la haŭto de lia korpo;
kaj la pastro deklaros lin malpura, ne enŝlosos lin; ĉar
li estas malpura. 12 Se la lepro disfloros sur la haŭto
kaj la lepro kovros la tutan haŭton de la infektito, de
lia kapo ĝis la piedoj, ĉion, kion povas vidi la okuloj
de la pastro; 13 kaj la pastro vidos, ke la lepro kovris
lian tutan korpon, tiam li deklaros la infektaĵon pura:
ĉio fariĝis blanka, tial ĝi estas pura. 14 Sed en la tago,
en kiu montriĝos sur li kruda karno, li estos malpura.
15 Kiam la pastro vidos la krudan karnon, li deklaros
lin malpura; la kruda karno estas malpura: ĝi estas
lepro. 16 Tamen se la kruda karno ŝanĝiĝos kaj fariĝos
blanka, tiam li venu al la pastro. 17 Kaj kiam la pastro
lin rigardos, kaj vidos, ke la infektaĵo aliformiĝis en
blankaĵon, tiam la pastro deklaros la infektaĵon pura;
li estos pura. 18 Kaj se sur ies korpo estos absceso
kaj resaniĝos, 19 kaj sur la loko de la absceso estos
blanka ŝvelaĵo aŭ ruĝete-blanka makulo, tiam li devas

sin montri al la pastro. 20 Kaj la pastro rigardos, kaj
se li vidos, ke ĝi aspektas pli profunda ol la haŭto
kaj ĝiaj haroj fariĝis blankaj, tiam la pastro deklaros
lin malpura: ĝi estas infektaĵo de lepro, ĝi ekfloris
en la absceso. 21 Kaj se la pastro vidos, ke ne estas
sur ĝi blankaj haroj kaj ĝi ne estas pli profunda ol la
haŭto kaj ĝi estas ne tre rimarkebla, tiam la pastro
enŝlosos lin por sep tagoj. 22 Sed se ĝi disvastiĝos
sur la haŭto, tiam la pastro deklaros lin malpura: tio
estas infektaĵo. 23 Se la makulo restos sur sia loko
kaj ne disvastiĝos, ĝi estas brulumo de absceso; kaj
la pastro deklaros ĝin pura. 24 Aŭ se sur la haŭto
de lia korpo estos brulvundo kaj sur la karno de la
brulvundo aperos makulo ruĝete-blanka aŭ blanka, 25
kaj la pastro ĝin rigardos, kaj vidos, ke la haroj sur la
makulo fariĝis blankaj kaj ĝi aspektas pli profunda
ol la haŭto, tiam ĝi estas lepro, kiu ekfloris sur la
brulvundo; kaj la pastro deklaros ĝin malpura: ĝi
estas infektaĵo de lepro. 26 Se la pastro vidos, ke sur
la makulo ne estas blankaj haroj kaj ĝi ne estas pli
profunda ol la haŭto kaj ĝi estas malmulte rimarkebla,
tiam la pastro enŝlosos lin por sep tagoj. 27 Kaj la
pastro lin rigardos en la sepa tago; se ĝi disvastiĝis sur
la haŭto, tiam la pastro deklaros lin malpura: ĝi estas
infektaĵo de lepro. 28 Sed se la makulo restis sur sia
loko kaj ne disvastiĝis sur la haŭto kaj estas malmulte
rimarkebla, tiam ĝi estas ŝvelaĵo de la brulvundo; kaj
la pastro deklaros lin pura, ĉar ĝi estas brulumo de la
brulvundo. 29 Se ĉe viro aŭ ĉe virino estos infektaĵo
sur la kapo aŭ sur la barbo, 30 kaj la pastro rigardos la
infektaĵon, kaj vidos, ke ĝi aspektas pli profunda ol
la haŭto kaj sur ĝi estas haroj flavetaj kaj maldikaj,
tiam la pastro deklaros lin malpura: tio estas favo,
tio estas lepro de la kapo aŭ de la barbo. 31 Sed se la
pastro rigardos la infektaĵon de la favo, kaj vidos, ke
ĝi ne aspektas pli profunda ol la haŭto kaj ne estas
sur ĝi nigraj haroj, tiam la pastro enŝlosos la favo-
infektiton por sep tagoj. 32 Kaj la pastro rigardos la
infektiton en la sepa tago, kaj se li vidos, ke la favo
ne disvastiĝis kaj ne estas sur ĝi flavetaj haroj kaj la
favaĵo ne aspektas pli profunda ol la haŭto, 33 tiam
oni lin razu, sed la favaĵon oni ne razu; kaj la pastro
enŝlosos la favulon denove por sep tagoj. 34 Kaj la
pastro rigardos la favulon en la sepa tago, kaj se li
vidos, ke la favo ne disvastiĝis sur la haŭto kaj ĝi
ne aspektas pli profunda ol la haŭto, tiam la pastro
deklaros lin pura; kaj li lavu siajn vestojn, kaj li estos
pura. 35 Sed se la favo disvastiĝos sur la haŭto, post
kiam li estis deklarita pura, 36 kaj la pastro vidos, ke
la favo disvastiĝis sur la haŭto, tiam la pastro ne serĉu
flavetajn harojn: li estas malpura. 37 Sed se la favo
haltis en sia stato kaj nigraj haroj elkreskis sur ĝi, tiam
la favo saniĝis; li estas pura, kaj la pastro deklaros
lin pura. 38 Se sur la haŭto de la korpo de iu viro
aŭ virino aperos makuloj, makuloj blankaj, 39 kaj la
pastro rigardos, kaj vidos, ke sur la haŭto de ilia korpo
la makuloj estas pale-blankaj, tiam ĝi estas likeno, kiu
ekfloris sur la haŭto; li estas pura. 40 Se ĉe iu elfalis la
haroj sur la kapo, li estas senharulo; li estas pura. 41
Se lia kapo senhariĝas sur la antaŭa parto, li estas
kalvulo; li estas pura. 42 Sed se sur la senharaĵo aŭ
sur la kalvaĵo estos infektaĵo blanke-ruĝeta, tiam ĝi
estas lepro, kiu ekfloris sur lia senharaĵo aŭ sur lia
kalvaĵo. 43 Kaj la pastro lin rigardos, kaj se li vidos,
ke la ŝvelaĵo de la infektaĵo estas blanke-ruĝeta sur
lia senharaĵo aŭ sur lia kalvaĵo, kiel aspektas lepro
sur la haŭto de la korpo, 44 tiam tio estas leprulo, li
estas malpura; la pastro deklaru lin malpura: sur lia
kapo estas lia infektaĵo. 45 Kaj la vestojn de la leprulo,
sur kiu estos tiu infektaĵo, oni devas disŝiri, kaj lia
kapo devas esti nekovrita, kaj ĝis la lipoj li devas esti
ĉirkaŭkovrita, kaj li devas kriadi: Malpura, malpura!
46 La tutan tempon, dum la infektaĵo estos sur li, li
estu rigardata kiel malpura; malpura li estas; li estu
izolita, ekster la tendaro estu lia loĝejo. 47 Kaj se estos
infektaĵo de lepro sur vesto lana aŭ sur vesto lina,
48 ĉu sur la fundamentaĵo, ĉu sur la enteksitaĵo, el
lino aŭ el lano, ĉu sur felo, ĉu sur ia felaĵo, 49 kaj la
infektaĵo estos verdeta aŭ ruĝeta sur la vesto aŭ sur la
felo, sur la fundamentaĵo aŭ sur la enteksitaĵo aŭ sur
la felaĵo, tiam ĝi estas infektaĵo de lepro, kaj oni devas
montri ĝin al la pastro. 50 Kaj la pastro pririgardos la
infektitaĵon kaj enŝlosos la infektitaĵon por sep tagoj.
51 Kaj li rigardos la infektitaĵon en la sepa tago; se li
vidos, ke la infektaĵo disvastiĝis sur la vesto, aŭ sur la
fundamentaĵo, aŭ sur la enteksitaĵo, aŭ sur ia felaĵo,
tiam la infektaĵo estas lepro pereiga; ĝi estas malpura.
52 Kaj oni forbruligu la veston aŭ la fundamentaĵon aŭ
la enteksitaĵon el lano aŭ el lino aŭ ĉian felaĵon, sur
kiu estos la infektaĵo; ĉar ĝi estas lepro pereiga, per
fajro oni devas ĝin forbruligi. 53 Sed se la pastro vidos,
ke la infektaĵo ne disvastiĝis sur la vesto aŭ sur la
fundamentaĵo aŭ sur la enteksitaĵo aŭ sur ia felaĵo, 54
tiam la pastro ordonos, ke oni lavu tion, sur kio estas

la infektaĵo, kaj li enŝlosos ĝin denove por sep tagoj.
55 Kaj la pastro rigardos la infektaĵon post la lavo, kaj
se li vidos, ke la infektaĵo ne ŝanĝis sian aspekton kaj
la infektaĵo ne disvastiĝis, tiam ĝi estas malpura, per
fajro oni ĝin forbruligu; ĝi estas penetriĝintaĵo sur
la antaŭa aŭ malantaŭa flanko. 56 Sed se la pastro
vidos, ke la infektaĵo fariĝis malpli rimarkebla post
la lavo, tiam li deŝiru ĝin de la vesto aŭ de la felo
aŭ de la fundamentaĵo aŭ de la enteksitaĵo. 57 Se ĝi
denove aperos sur la vesto aŭ sur la fundamentaĵo
aŭ sur la enteksitaĵo aŭ sur ia felaĵo, tiam ĝi estas
florantaĵo; per fajro oni forbruligu tion, sur kio estas
la infektaĵo. 58 Sed la veston aŭ la fundamentaĵon aŭ
la enteksitaĵon aŭ ĉian felaĵon, de kiuj post la lavo
foriĝos la infektaĵo, oni lavu duan fojon, kaj ĝi estos
pura. 59 Tio estas la leĝo pri la infektaĵo de lepro
sur vesto lana aŭ lina, ĉu sur fundamentaĵo, ĉu sur
enteksitaĵo, aŭ sur ia felaĵo, por deklari ĝin pura aŭ
malpura.

**14** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2 Jen
estas la leĝo pri la leprulo, en la tago, kiam oni
devos purigi lin: oni venigu lin al la pastro; 3 kaj la
pastro eliros ekster la tendaron, kaj la pastro rigardos,
kaj se li vidos, ke la infektaĵo de la lepro saniĝis ĉe la
leprulo, 4 tiam la pastro ordonos preni por la purigoto
du birdojn vivajn, purajn, kaj cedran lignon kaj ruĝan
ŝnureton kaj hisopon. 5 Kaj la pastro ordonos buĉi
unu birdon super argila vazo, super fluakvo. 6 Kaj
la vivan birdon li prenos kaj ankaŭ la cedran lignon
kaj la ruĝan ŝnureton kaj la hisopon, kaj li trempos
ilin kune kun la viva birdo en la sango de la birdo
buĉita super la fluakvo. 7 Kaj li aspergos la purigaton
je la lepro sep fojojn, kaj li deklaros lin pura, kaj li
lasos la vivan birdon forflugi sur la kampon. 8 Kaj la
purigato lavos siajn vestojn kaj forrazos ĉiujn siajn
harojn kaj banos sin en akvo, kaj li estos pura; kaj
poste li iros en la tendaron kaj restos ekster sia tendo
dum sep tagoj. 9 En la sepa tago li forrazos ĉiujn siajn
harojn, sian kapon kaj sian barbon kaj la brovojn
de siaj okuloj, ĉiujn siajn harojn li forrazos, kaj li
lavos siajn vestojn kaj banos sian korpon en akvo,
kaj li fariĝos pura. 10 Kaj en la oka tago li prenos du
ŝafidojn sendifektajn kaj unu ŝafidinon sendifektan,
jaraĝan, kaj tri dekonojn de efo da delikata faruno,
miksita kun oleo, kiel farunoferon, kaj unu log'on da
oleo. 11 Kaj la pastro puriganta starigos la homon
purigatan kaj ilin antaŭ la Eternulo, ĉe la pordo de la
tabernaklo de kunveno. 12 Kaj la pastro prenos unu el
la ŝafidoj kaj alportos ĝin kiel kulpoferon kune kun la
log'o da oleo, kaj skuos tion kiel skuoferon antaŭ la
Eternulo. 13 Kaj li buĉos la ŝafidon sur la loko, sur
kiu oni buĉas pekoferon kaj bruloferon, sur la sankta
loko; ĉar, kiel la pekofero, la kulpofero apartenas al la
pastro; ĝi estas plejsanktaĵo. 14 Kaj la pastro prenos
iom el la sango de la kulpofero, kaj la pastro metos
tion sur la malsupran randon de la dekstra orelo de la
purigato kaj sur la dikan fingron de lia dekstra mano
kaj sur la dikan fingron de lia dekstra piedo. 15 Kaj la
pastro prenos iom el la log'o da oleo kaj verŝos sur
sian maldekstran manplaton. 16 Kaj la pastro trempos
sian dekstran fingron en la oleo, kiu estos sur lia
maldekstra manplato, kaj li aspergos per la oleo de sia
fingro sep fojojn antaŭ la Eternulo. 17 Kaj el la restaĵo
de la oleo, kiu estos sur lia manplato, la pastro metos
iom sur la malsupran randon de la dekstra orelo de la
purigato kaj sur la dikan fingron de lia dekstra mano
kaj sur la dikan fingron de lia dekstra piedo, sur la
sangon de la kulpofero. 18 Kaj la restaĵon de la oleo,
kiu estos sur la manplato de la pastro, ĉi tiu metos
sur la kapon de la purigato; kaj la pastro pekliberigos
lin antaŭ la Eternulo. 19 Kaj la pastro plenumos la
pekoferon, kaj li pekliberigos la purigaton koncerne
lian malpurecon, kaj poste li buĉos la bruloferon. 20
Kaj la pastro metos la bruloferon kaj la farunoferon
sur la altaron; kaj la pastro pekliberigos lin, kaj li
estos pura. 21 Se li estas malriĉa kaj ne havas sufiĉe da
bonstato, tiam li prenu unu ŝafidon, kiel pekoferon-
skuataĵon, por pekliberiĝi, kaj unu dekonon de efo da
delikata faruno, miksita kun oleo, kiel farunoferon, kaj
log'on da oleo; 22 kaj du turtojn aŭ du kolombidojn,
kiel lia stato permesos, kaj unu el ili estos pekofero
kaj la dua estos brulofero. 23 Kaj li alportos ilin en
la oka tago de sia purigado al la pastro, al la pordo
de la tabernaklo de kunveno, antaŭ la Eternulon. 24
Kaj la pastro prenos la ŝafidon de la kulpofero kaj la
log'on da oleo, kaj la pastro skuos ilin kiel skuoferon
antaŭ la Eternulo. 25 Kaj li buĉos la ŝafidon de la
kulpofero, kaj la pastro prenos iom el la sango de la
kulpofero kaj metos ĝin sur la malsupran randon de
la dekstra orelo de la purigato kaj sur la dikan fingron
de lia dekstra mano kaj sur la dikan fingron de lia
dekstra piedo. 26 Kaj el la oleo la pastro verŝos sur
sian maldekstran manplaton. 27 Kaj la pastro aspergos

per sia dekstra fingro, per la oleo, kiu estos sur lia
maldekstra manplato, sep fojojn antaŭ la Eternulo.
28 Kaj la pastro metos iom el la oleo, kiu estos sur
lia manplato, sur la malsupran randon de la dekstra
orelo de la purigato kaj sur la dikan fingron de lia
dekstra mano kaj sur la dikan fingron de lia dekstra
piedo, sur la lokon de la sango de la kulpofero. 29
Kaj la restaĵon de la oleo, kiu estos sur la manplato
de la pastro, li metos sur la kapon de la purigato,
por pekliberigi lin antaŭ la Eternulo. 30 Kaj li faros
el unu el la turtoj aŭ el la kolombidoj, laŭ la grado
de lia bonstato, 31 kiom permesos lia bonstato — el
unu li faros pekoferon kaj el la dua li faros bruloferon
kune kun la farunofero; kaj la pastro pekliberigos la
purigaton antaŭ la Eternulo. 32 Tio estas la leĝo pri
persono, kiu havas infektaĵon de lepro kaj kiu ne estas
sufiĉe bonstata dum sia puriĝado. 33 Kaj la Eternulo
ekparolis al Moseo kaj al Aaron, dirante: 34 Kiam vi
venos en la landon Kanaanan, kiun Mi donas al vi kiel
posedaĵon, kaj Mi ĵetus infektaĵon de lepro sur iun
domon en la lando, kiun vi posedos, 35 tiam tiu, al kiu
apartenas la domo, devas veni, kaj diri al la pastro
jene: Sur mia domo aperis io simila al infektaĵo. 36
Tiam la pastro ordonos, ke oni malplenigu la domon,
antaŭ ol venos la pastro, por rigardi la infektaĵon, por
ke ne malpuriĝu ĉio, kio estas en la domo; kaj post
tio eniros la pastro, por ĉirkaŭrigardi la domon. 37
Kaj li rigardos la infektaĵon, kaj se li vidos, ke estas
infektaĵo sur la muroj de la domo, kavetoj verdetaj aŭ
ruĝetaj, kaj ili aspektas pli profundaj ol la supraĵo de
la muro, 38 tiam la pastro eliros el la domo antaŭ la
pordon de la domo, kaj li ŝlosos la domon por sep
tagoj. 39 Kaj revenos la pastro en la sepa tago kaj
rigardos; kaj se li vidos, ke la infektaĵo disvastiĝis sur
la muroj de la domo, 40 tiam la pastro ordonos, ke
oni elrompu la ŝtonojn, sur kiuj estas la infektaĵo, kaj
oni ĵetu ilin ekster la urbon, sur lokon malpuran. 41
Kaj la domon oni priskrapu interne ĉirkaŭe, kaj la
kalkaĵon, kiun oni deskrapis, oni ĵetu ekster la urbon,
sur lokon malpuran. 42 Kaj oni prenu aliajn ŝtonojn
kaj enmetu ilin sur la lokon de tiuj ŝtonoj, kaj oni
prenu alian kalkaĵon kaj kalku la domon. 43 Se la
infektaĵo reaperos kaj floros sur la domo, post kiam
oni elrompis la ŝtonojn kaj ĉirkaŭskrapis la domon kaj
kalkis, 44 kaj la pastro venos, kaj vidos, ke la infektaĵo
disvastiĝis sur la domo, tiam tio estas pereiga lepro
sur la domo; ĝi estas malpura. 45 Kaj oni detruu la
domon, ĝiajn ŝtonojn kaj lignon kaj la tutan kalkaĵon
de la domo, kaj oni elportu tion ekster la urbon, sur
lokon malpuran. 46 Kaj kiu eniros en la domon, dum la
tuta tempo, en kiu ĝi estos ŝlosita, tiu estos malpura
ĝis la vespero. 47 Kaj kiu dormis en tiu domo, tiu lavu
siajn vestojn; kaj kiu manĝis en tiu domo, tiu lavu
siajn vestojn. 48 Sed se la pastro venos, kaj vidos, ke la
infektaĵo ne disvastiĝis sur la domo, post kiam oni
kalkis la domon, tiam la pastro deklaros la domon
pura, ĉar la infektaĵo saniĝis. 49 Tiam, por senpekigi
la domon, li prenu du birdojn kaj cedran lignon kaj
ruĝan ŝnureton kaj hisopon; 50 kaj li buĉu unu el la
birdoj super argila vazo, super fluakvo; 51 kaj li prenu
la cedran lignon kaj la hisopon kaj la ruĝan ŝnureton
kaj la vivan birdon, kaj li trempu ilin en la sango de la
birdo buĉita kaj en la fluakvo kaj aspergu la domon
sep fojojn. 52 Kaj li senpekigos la domon per la sango
de la birdo kaj per la fluakvo kaj per la viva birdo kaj
per la cedra ligno kaj per la hisopo kaj per la ruĝa
ŝnureto. 53 Kaj li lasos la vivan birdon forflugi ekster
la urbon, sur la kampon; kaj li pekliberigos la domon,
kaj ĝi estos pura. 54 Tio estas la leĝo pri ĉiu infektaĵo
de lepro kaj pri favo, 55 kaj pri lepro sur vesto kaj sur
domo, 56 kaj pri ŝvelaĵo kaj pri likeno kaj pri makulo;
57 por instrui, kiam oni devas deklari malpura kaj
kiam oni devas deklari pura. Tio estas la leĝo pri la
lepro.

15 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo kaj al Aaron,
dirante: 2 Parolu al la Izraelidoj, kaj diru al ili:
Ĉiu, kiu havos elfluon el sia korpo, estos malpura pro
sia elfluo. 3 Kaj tia estos lia malpureco pro lia elfluo:
kiam fluas el lia korpo lia elfluo aŭ kiam ŝtopiĝis lia
korpo per lia elfluo, ĝi estas lia malpureco. 4 Ĉiu lito,
sur kiu kuŝos tiu, kiu havas elfluon, estos malpura; kaj
ĉiu objekto, sur kiu li sidos, estos malpura. 5 Kaj se iu
ektuŝos lian liton, li lavu siajn vestojn kaj banu sin
en akvo, kaj li estos malpura ĝis la vespero. 6 Kaj se
iu sidiĝos sur ia objekto, sur kiu sidis la elfluulo, li
lavu siajn vestojn kaj banu sin en akvo, kaj li estos
malpura ĝis la vespero. 7 Kaj kiu ektuŝos la korpon de
la elfluulo, tiu lavu siajn vestojn kaj banu sin en akvo,
kaj li estos malpura ĝis la vespero. 8 Se la elfluulo
kraĉos sur purulon, tiam ĉi tiu lavu siajn vestojn kaj
banu sin en akvo, kaj li estos malpura ĝis la vespero.
9 Kaj ĉiu veturilo, sur kiu veturis la elfluulo, estos
malpura. 10 Kaj ĉiu, kiu ektuŝos ion, kio estis sub tiu,

estos malpura ĝis la vespero; kaj kiu portos tion, tiu
lavu siajn vestojn kaj banu sin en akvo, kaj li estos
malpura ĝis la vespero. 11 Kaj ĉiu, kiun ektuŝos la
elfluulo, ne lavinte siajn manojn per akvo, lavu siajn
vestojn kaj banu sin en akvo, kaj li estos malpura
ĝis la vespero. 12 Kaj argilan vazon, kiun ektuŝos la
elfluulo, oni rompu; kaj ĉiun lignan vazon oni lavu
per akvo. 13 Kaj kiam la elfluulo puriĝos de sia elfluo,
tiam li kalkulu al si sep tagojn de post la tago de sia
puriĝo, kaj li lavu siajn vestojn kaj banu sian korpon
en fluakvo, kaj li estos pura. 14 Kaj en la oka tago li
prenu al si du turtojn aŭ du kolombidojn, kaj li venu
antaŭ la Eternulon al la pordo de la tabernaklo de
kunveno kaj donu ilin al la pastro. 15 Kaj la pastro
oferfaros ilin, unu kiel pekoferon kaj la duan kiel
bruloferon; kaj la pastro pekliberigos lin antaŭ la
Eternulo koncerne lian elfluon. 16 Se ĉe iu okazos
elfluo de la semo, tiam li banu en akvo sian tutan
korpon, kaj li estos malpura ĝis la vespero. 17 Kaj ĉiun
veston kaj ĉiun felon, sur kiun elverŝiĝis semo, oni
lavu per akvo, kaj ĝi estos malpura ĝis la vespero. 18
Kaj kiam kun virino kuŝis viro kun elverŝo de semo,
tiam ili banu sin en akvo, kaj ili estos malpuraj ĝis
la vespero. 19 Kaj kiam virino havos elfluon, sango
fluos el ŝia korpo, tiam ŝi dum sep tagoj restu en sia
malpureco; kaj ĉiu, kiu ŝin ektuŝos, estos malpura
ĝis la vespero. 20 Kaj ĉio, sur kio ŝi kuŝos dum sia
malpureco, estos malpura; kaj ĉio, sur kio ŝi sidos,
estos malpura. 21 Kaj ĉiu, kiu ektuŝos ŝian liton,
lavu siajn vestojn kaj banu sin en akvo, kaj li estos
malpura ĝis la vespero. 22 Kaj ĉiu, kiu ektuŝos ian
objekton, sur kiu ŝi sidis, lavu siajn vestojn kaj banu
sin en akvo, kaj li estos malpura ĝis la vespero. 23
Kaj se io estos sur la lito, aŭ sur objekto, sur kiu ŝi
sidis, kaj iu tion ektuŝos, tiam li estos malpura ĝis la
vespero. 24 Kaj se viro kuŝos kun ŝi kaj ŝia malpureco
estos sur li, tiam li estos malpura dum sep tagoj;
kaj ĉiu kuŝejo, sur kiu li kuŝos, estos malpura. 25 Se
ĉe virino fluos ŝia sango dum multaj tagoj ne en la
tempo de ŝia monataĵo, aŭ se ŝi havos elfluon krom sia
monataĵo, tiam dum la tuta tempo de elfluado de ŝia
malpuraĵo, simile kiel dum la tempo de ŝia monataĵo,
ŝi estos malpura. 26 Ĉiu kuŝejo, sur kiu ŝi kuŝos dum
la tuta tempo de sia elfluado, estos kiel la kuŝejo dum
ŝia monataĵo; kaj ĉiu objekto, sur kiu ŝi sidos, estos
malpura, simile al la malpureco dum ŝia monataĵo. 27
Kaj ĉiu, kiu ektuŝos ilin, estos malpura; li lavu siajn
vestojn kaj banu sin en akvo, kaj li estos malpura ĝis
la vespero. 28 Kaj kiam ŝi puriĝos de sia elfluo, tiam
ŝi kalkulu al si sep tagojn, kaj poste ŝi estos pura.
29 Kaj en la oka tago ŝi prenu al si du turtojn aŭ du
kolombidojn, kaj ŝi alportu ilin al la pastro, al la pordo
de la tabernaklo de kunveno. 30 Kaj la pastro oferfaros
unu kiel pekoferon kaj la duan kiel bruloferon; kaj la
pastro pekliberigos ŝin antaŭ la Eternulo koncerne
la elfluon de ŝia malpureco. 31 Tiel antaŭgardu la
Izraelidojn kontraŭ ilia malpureco, por ke ili ne mortu
en sia malpureco, malpurigante Mian loĝejon, kiu
estas inter ili. 32 Tio estas la leĝo pri la havanto de
elfluo, kaj pri tiu, kiu havas elverŝiĝon de semo, per
kio li fariĝas malpura; 33 kaj pri malsanulino pro sia
monataĵo; kaj pri havanto de elfluo, ĉu tio estas viro,
ĉu virino; kaj pri viro, kiu kuŝos kun malpurulino.

**16** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo post la morto
de la du filoj de Aaron, kiam ili venis antaŭ
la Eternulon kaj mortis. 2 Kaj la Eternulo diris al
Moseo: Diru al via frato Aaron, ke li ne en ĉiu tempo
eniru en la sanktejon malantaŭ la kurtenon, antaŭ la
fermoplaton, kiu estas sur la kesto, por ke li ne mortu;
ĉar en nubo Mi aperados super la fermoplato. 3 Kun
jeno Aaron venadu en la sanktejon: kun bovido por
pekofero kaj kun virŝafo por brulofero. 4 Sanktan linan
ĥitonon li surmetu sur sin, kaj linaj pantalonoj estu
sur lia korpo, kaj per lina zono li zonu sin, kaj linan
cidaron li havu sur la kapo: tio estas sanktaj vestoj.
Kaj li banu en akvo sian korpon kaj surmetu ilin sur
sin. 5 Kaj de la komunumo de la Izraelidoj li prenu du
kaprojn por pekofero kaj unu virŝafon por brulofero.
6 Kaj Aaron alportos sian bovidon de pekofero, kaj
pekliberigos sin kaj sian domon. 7 Kaj li prenos la du
kaprojn, kaj starigos ilin antaŭ la Eternulo, ĉe la pordo
de la tabernaklo de kunveno. 8 Kaj Aaron faros lotojn
pri la du kaproj: unu loton por la Eternulo kaj la duan
loton por Azazel. 9 Kaj Aaron alportos la kapron, sur
kiun falis la loto por la Eternulo, kaj li oferfaros ĝin
kiel pekoferon. 10 Kaj la kapron, sur kiun falis la loto
por Azazel, li starigu vivan antaŭ la Eternulo, por
fari super ĝi pekliberigon kaj forsendi ĝin al Azazel
en la dezerton. 11 Kaj Aaron alportos sian bovidon
de pekofero, kaj pekliberigos sin kaj sian domon,
kaj buĉos sian bovidon de pekofero. 12 Kaj li prenos
plenan incensujon da ardantaj karboj de la altaro,
kiu staras antaŭ la Eternulo, kaj plenajn plenmanojn

da bonodora pistita incenso, kaj li enportos tion
malantaŭ la kurtenon. 13 Kaj li metos la incenson sur
la fajron antaŭ la Eternulon, kaj nubo de la incenso
kovros la fermoplaton, kiu estas sur la kesto de atesto,
por ke li ne mortu. 14 Kaj li prenos iom el la sango de
la bovido kaj aspergos per sia fingro la antaŭan parton
de la fermoplato, kaj antaŭ la fermoplato li aspergos
sep fojojn per la sango, kiu estos sur lia fingro. 15
Kaj li buĉos la pekoferan kapron de la popolo, kaj li
enportos ĝian sangon malantaŭ la kurtenon, kaj agos
kun ĝia sango tiel same, kiel li agis kun la sango de
la bovido, kaj li aspergos per ĝi sur la fermoplaton
kaj antaŭ la fermoplato. 16 Kaj li pekliberigos la
sanktejon koncerne la malpuraĵojn de la Izraelidoj
kaj iliajn krimojn, en ĉiuj iliaj pekoj; kaj tiel li agos
kun la tabernaklo de kunveno, kiu estas inter ili,
meze de iliaj malpuraĵoj. 17 Neniu homo estu en la
tabernaklo de kunveno, kiam li eniros, por pekliberigi
la sanktejon, ĝis li eliros. Kaj li pekliberigos sin kaj
sian domon kaj la tutan komunumon de Izrael. 18 Kaj
li eliros al la altaro, kiu estas antaŭ la Eternulo, kaj
pekliberigos ĝin; kaj li prenos iom el la sango de la
bovido kaj el la sango de la kapro, kaj metos ĝin sur la
kornojn de la altaro ĉirkaŭe. 19 Kaj li aspergos ĝin
sep fojojn per la sango, kiu estas sur lia fingro, kaj
li purigos ĝin kaj sanktigos ĝin de la malpuraĵoj de
la Izraelidoj. 20 Kiam li finos la pekliberigadon de la
sanktejo kaj de la tabernaklo de kunveno kaj de la
altaro, li alkondukos la vivan kapron; 21 kaj Aaron
metos siajn ambaŭ manojn sur la kapon de la viva
kapro kaj konfesos super ĝi ĉiujn malbonagojn de
la Izraelidoj kaj ĉiujn iliajn krimojn kaj ĉiujn iliajn
pekojn, kaj li metos ilin sur la kapon de la kapro kaj
forsendos ĝin per speciala homo en la dezerton. 22
Kaj la kapro forportos sur si ĉiujn iliajn malbonagojn
en landon senkomunikiĝan; kaj li foririgos la kapron
en la dezerton. 23 Kaj Aaron eniros en la tabernaklon
de kunveno, kaj demetos de si la linajn vestojn, kiujn
li surmetis, enirante en la sanktejon, kaj li restigos
ilin tie. 24 Kaj li banos sian korpon en akvo sur sankta
loko, kaj li surmetos sur sin siajn vestojn, kaj eliros
kaj oferfaros sian bruloferon kaj la bruloferon de la
popolo, kaj li pekliberigos sin kaj la popolon. 25 Kaj la
sebon de la pekofero li fumbruligu sur la altaro. 26
Kaj tiu, kiu forkondukis la kapron por Azazel, lavu
siajn vestojn kaj banu sian korpon en akvo, kaj poste
li povas eniri en la tendaron. 27 Kaj la propekan
bovidon kaj la propekan kapron, kies sango estis
enportita, por pekliberigi la sanktejon, oni elportu
ekster la tendaron, kaj oni forbruligu per fajro ilian
felon kaj ilian karnon kaj ilian malpuraĵon. 28 Kaj
tiu, kiu forbruligis ilin, lavu siajn vestojn kaj banu
sian korpon en akvo, kaj poste li povas eniri en la
tendaron. 29 Kaj tio estu por vi eterna leĝo: en la sepa
monato, en la deka tago de la monato, premu viajn
animojn, kaj faru nenian laboron, nek la indiĝeno,
nek la fremdulo, kiu loĝas inter vi. 30 Ĉar en tiu tago
oni vin pekliberigos, por purigi vin; de ĉiuj viaj pekoj
antaŭ la Eternulo vi fariĝos puraj. 31 Sabato de plena
ripozo ĝi estu por vi; kaj premu viajn animojn; ĝi
estu leĝo por eterne. 32 Pekliberigos la pastro, kiu
estas sanktoleita, kaj kiu estas konsekrita, por pastri
anstataŭ sia patro; kaj li surmetos sur sin la linajn
vestojn, la sanktajn vestojn. 33 Kaj li pekliberigos la
plej sanktan sanktejon kaj la tabernaklon de kunveno,
kaj la altaron li pekliberigos; kaj la pastrojn kaj la
tutan popolon de la komunumo li pekliberigos. 34 Kaj
tio estu por vi leĝo eterna: pekliberigi la Izraelidojn
koncerne iliajn pekojn unu fojon en jaro. Kaj li faris,
kiel la Eternulo ordonis al Moseo.

17 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2
Parolu al Aaron kaj al liaj filoj kaj al ĉiuj Izraelidoj,
kaj diru al ili: Jen estas tio, kion la Eternulo ordonis: 3
Se iu el la domo de Izrael buĉos bovon aŭ ŝafon aŭ
kapron en la tendaro, aŭ se li buĉos ĝin ekster la
tendaro, 4 kaj ne alkondukos ĝin al la pordo de la
tabernaklo de kunveno, por prezenti ĝin kiel oferon
al la Eternulo, antaŭ la loĝejo de la Eternulo, tiam
tiu homo estos kulpa pri sango: li verŝis sangon, kaj
tiu homo ekstermiĝos el inter sia popolo. 5 Por ke la
Izraelidoj alkondukadu siajn buĉotojn, kiujn ili volas
buĉi sur la kampo, kaj ili alkonduku ilin antaŭ la
Eternulon, al la pordo de la tabernaklo de kunveno, al
la pastro, kaj ili buĉu ilin kiel pacoferojn al la Eternulo.
6 Kaj la pastro aspergos per la sango la altaron de la
Eternulo ĉe la pordo de la tabernaklo de kunveno,
kaj li fumbruligos la sebon kiel agrablan odoraĵon al
la Eternulo. 7 Ili ne buĉu plu siajn oferbrutojn al la
demonoj, kiujn ili malĉaste adoras. Leĝo eterna tio
estu por ili en iliaj generacioj. 8 Kaj diru al ili: Se iu
el la domo de Izrael, aŭ el la fremduloj, kiuj loĝas
inter ili, alportos bruloferon aŭ simplan oferon, 9
kaj ne alkondukos ĝin al la pordo de la tabernaklo

de kunveno, por oferfari ĝin al la Eternulo, tiam tiu
homo ekstermiĝos el sia popolo. 10 Se iu el la domo de
Izrael, aŭ el la fremduloj, kiuj loĝas inter ili, manĝos
ian sangon, tiam Mi turnos Mian vizaĝon kontraŭ
tiun, kiu manĝis la sangon, kaj Mi ekstermos lin el
inter lia popolo. 11 Ĉar la animo de korpo estas en la
sango; kaj Mi destinis al vi ĉi tion por la altaro, por
pekliberigi viajn animojn, ĉar la sango pekliberigas
per la animo. 12 Tial Mi diris al la Izraelidoj: Neniu el
vi manĝu sangon, kaj ankaŭ la fremdulo, kiu loĝas
inter vi, ne manĝu sangon. 13 Se iu el la Izraelidoj, aŭ
el la fremduloj, kiuj loĝas inter ili, ĉaskaptos beston
aŭ birdon, kiun oni povas manĝi, tiam li elfluigu ĝian
sangon kaj kovru ĝin per polvo. 14 Ĉar la animo de
ĉiu korpo estas ĝia sango, en ĝia animo ĝi estas. Tial
Mi diris al la Izraelidoj: La sangon de ia korpo ne
manĝu, ĉar la animo de ĉiu korpo estas ĝia sango; ĉiu,
kiu ĝin manĝos, ekstermiĝos. 15 Kaj ĉiu, kiu manĝos
mortintaĵon aŭ disŝiritaĵon, ĉu li estas indiĝeno, ĉu
fremdulo, lavu siajn vestojn kaj banu sin en akvo, kaj
li estos malpura ĝis la vespero, kaj poste li estos pura.
16 Sed se li ne lavos kaj sian korpon ne banos, li portos
sur si sian malbonagon.

18 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2
Parolu al la Izraelidoj, kaj diru al ili: Mi estas la
Eternulo, via Dio. 3 Laŭ la agoj de la lando Egipta,
en kiu vi loĝis, ne agu; kaj laŭ la agoj de la lando
Kanaana, en kiun Mi venigas vin, ne agu; laŭ iliaj
leĝoj ne kondutu. 4 Miajn decidojn plenumu kaj
Miajn leĝojn observu, por konduti laŭ ili: Mi estas
la Eternulo, via Dio. 5 Kaj observu Miajn leĝojn kaj
Miajn decidojn, kiujn plenumante, la homo vivas
per ili: Mi estas la Eternulo. 6 Neniu alproksimiĝu
al iu sia korpoparencino, por malkovri nudecon: Mi
estas la Eternulo. 7 La nudecon de via patro kaj la
nudecon de via patrino ne malkovru: ŝi estas via
patrino, ne malkovru ŝian nudecon. 8 La nudecon de
via patredzino ne malkovru: ĝi estas la nudeco de via
patro. 9 La nudecon de via fratino, filino de via patro
aŭ filino de via patrino, ĉu ŝi naskiĝis en la domo, ĉu
ŝi naskiĝis ekstere, ne malkovru ilian nudecon. 10 La
nudecon de filino de via filo aŭ de filino de via filino,
ne malkovru ilian nudecon; ĉar tio estas via nudeco.
11 La nudecon de filino de via patredzino, kiu naskiĝis
de via patro, ŝi estas via fratino, ne malkovru ŝian
nudecon. 12 La nudecon de fratino de via patro ne
malkovru: ŝi estas korpoparencino de via patro. 13 La
nudecon de fratino de via patrino ne malkovru; ĉar ŝi
estas korpoparencino de via patrino. 14 La nudecon
de frato de via patro ne malkovru, al lia edzino ne
alproksimiĝu: ŝi estas via onklino. 15 La nudecon de
via bofilino ne malkovru: ŝi estas edzino de via filo,
ne malkovru ŝian nudecon. 16 La nudecon de edzino
de via frato ne malkovru: ĝi estas nudeco de via frato.
17 La nudecon de virino kaj de ŝia filino ne malkovru:
filinon de ŝia filo kaj filinon de ŝia filino ne prenu,
por malkovri ilian nudecon: ili estas korpoparencinoj;
tio estas malĉasteco. 18 Kaj virinon kune kun ŝia
fratino ne prenu kiel konkurantinon, por malkovri
ŝian nudecon apud ŝi, dum ŝia vivo. 19 Kaj al virino
dum ŝia monata malpureco ne alproksimiĝu, por
malkovri ŝian nudecon. 20 Kaj kun la edzino de via
proksimulo ne kuŝu pro semo, malpuriĝante kun ŝi.
21 Kaj el via idaro ne fordonu oferon al Moleĥ, kaj ne
malhonoru la nomon de via Dio: Mi estas la Eternulo.
22 Kaj kun virseksulo ne kuŝu, kiel oni kuŝas kun
virino: tio estas abomenaĵo. 23 Kaj kun nenia bruto
kuŝu, malpuriĝante per ĝi; kaj virino ne stariĝu antaŭ
bruto, por kuniĝi: tio estas fiaĵo. 24 Ne malpuriĝu
per ĉio ĉi tio; ĉar per ĉio ĉi tio malpuriĝis la popoloj,
kiujn Mi forpelas de antaŭ vi. 25 Kaj malpuriĝis la
tero, kaj Mi postulas respondon pri ĝia malbonagado,
kaj la tero elĵetas siajn loĝantojn. 26 Sed vi observu
Miajn leĝojn kaj Miajn decidojn, kaj ne faru iujn el
tiuj abomenaĵoj, nek la indiĝeno, nek la fremdulo,
kiu loĝas inter vi 27 (ĉar ĉiujn tiujn abomenaĵojn
faris la homoj de tiu tero, kiuj loĝis antaŭ vi, kaj la
tero malpuriĝis); 28 por ke la tero ne elĵetu ankaŭ
vin, kiam vi malpurigos ĝin, kiel ĝi elĵetis la popolon,
kiu estis antaŭ vi. 29 Ĉar se iu faros ion el ĉiuj tiuj
abomenaĵoj, la farantoj ekstermiĝos el sia popolo. 30
Observu do Miajn ordonojn, por ke vi ne agu laŭ la
abomenindaj leĝoj, laŭ kiuj oni agis antaŭ vi, kaj por
ke vi ne malpuriĝu per ili: Mi estas la Eternulo, via
Dio.

19 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2
Parolu al la tuta komunumo de la Izraelidoj,
kaj diru al ili: Sanktaj estu, ĉar sankta estas Mi, la
Eternulo, via Dio. 3 Ĉiu el vi timu sian patrinon kaj
sian patron, kaj Miajn sabatojn observu: Mi estas la
Eternulo, via Dio. 4 Ne turnu vin al idoloj, kaj diojn
fanditajn ne faru al vi: Mi estas la Eternulo, via Dio.

5 Kaj kiam vi buĉos pacoferon al la Eternulo, buĉu
ĝin, por akiri plaĉon. 6 En la tago de la oferado ĝi
estu manĝata kaj en la morgaŭa tago; sed tion, kio
restis ĝis la tria tago, oni forbruligu per fajro. 7 Sed se
oni ĝin manĝos en la tria tago, ĝi estos abomenaĵo,
ĝi ne plaĉos. 8 Kaj ĝia manĝinto portos sur si sian
malbonagon, ĉar li malhonoris la sanktaĵon de la
Eternulo; kaj tiu animo ekstermiĝos el sia popolo. 9
Kaj kiam vi rikoltos rikoltaĵon de via tero, ne rikoltu
ĉion ĝis la rando de via kampo, kaj la restaĵon de via
rikoltaĵo ne forkolektu. 10 Kaj vian vinberejon ne tute
senberigu, kaj la falintajn berojn en via vinberejo
ne forkolektu; por la malriĉulo kaj por la fremdulo
restigu ilin: Mi estas la Eternulo, via Dio. 11 Ne ŝtelu,
kaj ne mensogu, kaj ne trompu unu alian. 12 Kaj
ne ĵuru per Mia nomo mensoge, malhonorante la
nomon de via Dio: Mi estas la Eternulo. 13 Ne premu
vian proksimulon kaj ne rabu; la pago por dungito
ne noktorestu ĉe vi ĝis mateno. 14 Ne malbenu
surdulon, kaj antaŭ blindulo ne kuŝigu falilon; timu
vian Dion: Mi estas la Eternulo. 15 Ne faru maljustaĵon
en la juĝado, ne estu partia por malriĉulo kaj ne
estimu potenculon; juste juĝu vian proksimulon. 16 Ne
disportu kalumniojn inter via popolo, ne staru kontraŭ
la sango de via proksimulo: Mi estas la Eternulo. 17
Ne malamu vian fraton en via koro; admonu vian
proksimulon, por ke vi ne portu sur vi pekon pro li.
18 Ne faru venĝon kaj ne portu koleron kontraŭ la
filoj de via popolo; amu vian proksimulon kiel vin
mem: Mi estas la Eternulo. 19 Miajn leĝojn observu.
Vian bruton ne parigu miksospece, vian kampon ne
prisemu miksospece, kaj veston miksospecan el lano
kaj lino ne surmetu sur vin. 20 Se viro kuŝas kun
virino pro semo, kaj ŝi estas sklavino, ordonita al viro,
sed ankoraŭ ne elaĉetita aŭ ne ricevinta liberecon,
tiam devas esti enketo, sed ili ne mortu, ĉar ŝi ne
estis libera. 21 Li alportu pro sia kulpo al la Eternulo
antaŭ la pordon de la tabernaklo de kunveno virŝafon
kiel pekoferon. 22 Kaj la pastro pekliberigos lin per
la virŝafo de pekofero antaŭ la Eternulo koncerne la
pekon, kiun li pekis, kaj pardonita estos al li la peko,
kiun li pekis. 23 Kaj kiam vi venos en la landon kaj
plantos ian arbon manĝodonan, tiam rigardu ĝiajn
fruktojn kvazaŭ konsekritaj; dum tri jaroj ili estu por
vi kvazaŭ konsekritaj, ili ne estu manĝataj. 24 En la
kvara jaro ĉiuj ĝiaj fruktoj estu sanktaj, dankoferoj al
la Eternulo. 25 Sed en la kvina jaro vi povas manĝi
ĝiajn fruktojn, kolektante por vi ĝiajn produktaĵojn:
Mi estas la Eternulo, via Dio. 26 Ne manĝu kun sango;
ne aŭguru kaj ne antaŭdiru sorĉe. 27 Ne ĉirkaŭtondu
la flankojn de via kapo kaj ne fordifektu la flankojn
de via barbo. 28 Entranĉojn pro mortinto ne faru
sur via korpo kaj skribon enpikitan ne faru sur vi:
Mi estas la Eternulo. 29 Ne senhonorigu vian filinon,
prostituante ŝin; por ke la lando ne fariĝu prostituista
kaj por ke la lando ne pleniĝu de malĉasteco. 30
Miajn sabatojn gardu kaj Mian sanktejon respektu:
Mi estas la Eternulo. 31 Ne turnu vin al magiistoj
nek al sorĉistoj, ne provu malpuriĝi per ili: Mi estas
la Eternulo, via Dio. 32 Antaŭ grizulo stariĝu, kaj
respektu la vizaĝon de maljunulo, kaj timu vian Dion:
Mi estas la Eternulo. 33 Kaj se ekloĝos ĉe vi fremdulo
en via lando, ne premu lin. 34 Kiel indiĝeno el inter vi
estu por vi la fremdulo, kiu ekloĝis ĉe vi, kaj amu lin
kiel vin mem, ĉar fremduloj vi estis en la lando Egipta:
Mi estas la Eternulo, via Dio. 35 Ne faru maljustaĵon
en la juĝo, en la mezuro, en la peso, en la amplekso.
36 Pesilo ĝusta, peziloj ĝustaj, efo ĝusta, kaj hino ĝusta
estu ĉe vi: Mi estas la Eternulo, via Dio, kiu elkondukis
vin el la lando Egipta. 37 Kaj observu ĉiujn Miajn
leĝojn kaj ĉiujn Miajn decidojn kaj plenumu ilin: Mi
estas la Eternulo.

20 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2
Al la Izraelidoj diru: Ĉiu el la Izraelidoj, kaj el
la fremduloj, kiuj loĝas inter la Izraelidoj, kiu donos
iun el siaj idoj al Moleĥ, mortu; la popolo de la lando
mortigu lin per ŝtonoj. 3 Mi turnos Mian vizaĝon
kontraŭ tiun homon, kaj Mi ekstermos lin el inter
lia popolo pro tio, ke el siaj idoj li donis al Moleĥ,
por malpurigi Mian sanktejon kaj malhonori Mian
sanktan nomon. 4 Kaj se la popolo de la lando kovros
siajn okulojn for de tiu homo, kiam li donos iun el
siaj idoj al Moleĥ, kaj ne mortigos lin: 5 tiam Mi
turnos Mian vizaĝon kontraŭ tiun homon kaj kontraŭ
lian familion, kaj Mi ekstermos lin, kaj ĉiujn, kiuj
malĉastos, imitante lin en la malĉastado por Moleĥ,
el inter ilia popolo. 6 Kaj se iu animo sin turnos al
magiistoj kaj sorĉistoj, por malĉasti sub ilia gvido,
tiam Mi turnos Mian vizaĝon kontraŭ tiun animon kaj
ekstermos ĝin el inter ĝia popolo. 7 Sanktigu vin kaj
estu sanktaj, ĉar Mi estas la Eternulo, via Dio. 8 Kaj
observu Miajn leĝojn kaj plenumu ilin: Mi estas la
Eternulo, kiu sanktigas vin. 9 Ĉiu, kiu malbenas sian

patron aŭ sian patrinon, estu mortigita: sian patron
kaj sian patrinon li malbenis, lia sango estu sur li. 10
Kaj se iu adultis kun edzinigita virino, se iu adultis
kun la edzino de sia proksimulo, estu mortigitaj la
adultinto kaj la adultintino. 11 Kaj se iu kuŝis kun la
edzino de sia patro, li malkovris la nudecon de sia
patro; ambaŭ ili estu mortigitaj, ilia sango estu sur
ili. 12 Kaj se iu kuŝis kun sia bofilino, ili ambaŭ estu
mortigitaj: abomenaĵon ili faris, ilia sango estu sur ili.
13 Kaj se iu kuŝis kun viro kiel kun virino, abomenaĵon
ili ambaŭ faris: ili estu mortigitaj, ilia sango estu sur
ili. 14 Kaj se iu prenis virinon kaj ŝian patrinon, tio
estas malĉastegeco: per fajro oni forbruligu lin kaj
ilin, por ke ne estu malĉasteco inter vi. 15 Kaj se iu
kuŝis kun bruto, li estu mortigita, kaj ankaŭ la bruton
mortigu. 16 Kaj se virino alproksimiĝis al ia bruto,
por sekskuniĝi kun ĝi, tiam mortigu la virinon kaj
la bruton: ili estu mortigitaj, ilia sango estu sur ili.
17 Kaj se iu prenis sian fratinon, filinon de sia patro
aŭ filinon de sia patrino, kaj li vidis ŝian nudecon
kaj ŝi vidis lian nudecon, tio estas maldecaĵo; kaj ili
devas esti ekstermitaj antaŭ la okuloj de sia popolo:
la nudecon de sia fratino li malkovris, li portu sian
pekon. 18 Kaj se iu kuŝis kun virino dum ŝia malsano
kaj malkovris ŝian nudecon, li vidatigis ŝian elfluejon
kaj ŝi malkovris la elfluejon de sia sango: ili ambaŭ estu
ekstermitaj el inter sia popolo. 19 Kaj la nudecon de la
fratino de via patrino kaj de la fratino de via patro
ne malkovru; ĉar li nudigis sian korpoparencinon, ili
portu sian pekon. 20 Kaj se iu kuŝis kun sia onklino,
li malkovris la nudecon de sia onklo: ili portu sian
pekon, ili mortos seninfanaj. 21 Kaj se iu prenis la
edzinon de sia frato, tio estas malpuraĵo: la nudecon
de sia frato li malkovris, seninfanaj ili estos. 22 Kaj
observu ĉiujn Miajn leĝojn kaj ĉiujn Miajn decidojn
kaj plenumu ilin, por ke ne elĵetu vin la lando, en kiun
Mi kondukas vin, por tie loĝi. 23 Kaj ne agu laŭ la leĝoj
de la popolo, kiun Mi forpelas de antaŭ vi, ĉar ĉion ĉi
tion ili faris kaj Mi ekabomenis ilin. 24 Kaj Mi diris al
vi: Vi heredos ilian landon, kaj Mi ĝin donos al vi,
por ke vi posedu ĝin, la landon, en kiu fluas lakto kaj
mielo. Mi estas la Eternulo, via Dio, kiu distingis vin
el inter la popoloj. 25 Kaj faru diferencon inter bruto
pura kaj malpura kaj inter birdo malpura kaj pura; kaj
ne malpurigu viajn animojn per bruto kaj per birdo,
kaj per ĉio, kio moviĝas sur la tero, kion Mi apartigis
por vi, ke vi rigardu ilin kiel malpurajn. 26 Kaj estu
antaŭ Mi sanktaj, ĉar sankta estas Mi, la Eternulo,
kaj Mi apartigis vin el inter la popoloj, por ke vi estu
Miaj. 27 Kaj viro aŭ virino, se ili estos magiistoj aŭ
sorĉistoj, estu mortigitaj; per ŝtonoj oni ilin mortigu,
ilia sango estu sur ili.

**21** Kaj la Eternulo diris al Moseo: Parolu al la
pastroj, la Aaronidoj, kaj diru al ili: Neniu el ili
malpurigu sin per mortinto en sia popolo; 2 krom
nur per sia proksima parenco, per sia patrino, per sia
patro, per sia filo, per sia filino, kaj per sia frato; 3
kaj per sia fratino-virgulino, proksima al li, kiu ne
estis edzinigita, per ŝi li povas sin malpurigi. 4 Li ne
malpurigu sin, kiel estro en sia popolo, malsanktigante
sin. 5 Ili ne faru al si senharaĵon sur sia kapo, kaj la
flankojn de sia barbo ili ne razu, kaj sur sia korpo
ili ne faru entranĉojn. 6 Sanktaj ili estu antaŭ sia
Dio, kaj ili ne malsanktigu la nomon de sia Dio; ĉar
la fajroferojn al la Eternulo, la panon al sia Dio ili
alportas; tial ili estu sanktaj. 7 Virinon malĉastan aŭ
senhonorigitan ili ne prenu, kaj virinon, forpuŝitan
de sia edzo, ili ne prenu; ĉar pastro estas sankta al sia
Dio. 8 Tial tenu lin sankte, ĉar la panon de via Dio li
alportas; sankta li estu por vi, ĉar sankta estas Mi,
la Eternulo, kiu sanktigas vin. 9 Se filino de pastro
senhonoriĝis per malĉastado, ŝi senhonorigas sian
patron: oni forbruligu ŝin per fajro. 10 La granda
pastro inter siaj fratoj, tiu, sur kies kapon estas verŝita
la sankta oleo, kaj kiu estas konsekrita, por porti
la vestojn, ne devas nudigi sian kapon nek disŝiri
siajn vestojn. 11 Kaj al neniu mortinto li venu; eĉ
per sia patro aŭ sia patrino li sin ne malpurigu. 12
Kaj el la sanktejo li ne eliru, kaj li ne malhonoru
la sanktejon de sia Dio; ĉar sanktigo per la sankta
oleo de lia Dio estas sur li: Mi estas la Eternulo.
13 Edzinon li prenu al si virgulinon. 14 Vidvinon,
forpuŝitinon, senhonorigitinon, aŭ malĉastulinon li
ne prenu, sed nur virgulinon el sia popolo li prenu
kiel edzinon. 15 Kaj li ne senhonorigu sian semon en
sia popolo, ĉar Mi estas la Eternulo, kiu lin sanktigas.
16 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 17 Diru
al Aaron jene: Se iu el via idaro en iliaj generacioj
havos ian kriplaĵon, li ne alproksimiĝu, por alporti
la panon de sia Dio. 18 Ĉar neniu, kiu havas ian
kriplaĵon, alproksimiĝu: nek blindulo, nek lamulo,
nek platnazulo, nek monstrulo, 19 nek homo, kiu
havas rompitan kruron aŭ rompitan brakon, 20 nek

ĝibulo, nek ftizulo, nek makulokululo, nek aknulo, nek
favulo, nek herniulo. 21 Neniu, kiu havas kriplaĵon el
la idaro de Aaron la patro, alproksimiĝu, por alporti
la fajroferojn de la Eternulo: li havas kriplaĵon, tial li
ne alproksimiĝu, por alporti la panon de sia Dio. 22 La
panon de sia Dio el la plejsanktaĵoj kaj el la sanktaĵoj
li povas manĝi. 23 Sed al la kurteno li ne aliru kaj al la
altaro li ne alproksimiĝu, ĉar li havas kriplaĵon; por ke
li ne malhonoru Miajn sanktejojn, ĉar Mi, la Eternulo,
ilin sanktigas. 24 Kaj Moseo tion diris al Aaron kaj al
liaj filoj kaj al ĉiuj Izraelidoj.

22 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2
Diru al Aaron kaj al liaj filoj, ke ili agu singarde
koncerne la sanktaĵojn de la Izraelidoj, kaj ili ne
malhonoru Mian sanktan nomon en tio, kion ili
konsekras al Mi: Mi estas la Eternulo. 3 Diru al
ili: Se iu en viaj generacioj el via tuta idaro aliros
al la sanktaĵoj, kiujn la Izraelidoj konsekras al la
Eternulo, kaj li havos sur si malpuraĵon, tiam tiu
animo ekstermiĝos de antaŭ Mi: Mi estas la Eternulo.
4 Se iu el la idaro de Aaron havos lepron aŭ elfluon,
tiu ne manĝu la sanktaĵojn, ĝis li puriĝos. Kiu ektuŝis
iun, kiu malpuriĝis per mortinto, aŭ kiu havas elfluon
de semo; 5 aŭ kiu ektuŝis ian rampaĵon, per kiu li
malpuriĝis, aŭ iun homon, de kiu li malpuriĝis per ia
lia malpuraĵo; 6 tiu, ektuŝinte tion, estos malpura ĝis
la vespero, kaj li ne manĝu la sanktaĵojn, antaŭ ol li
estos lavinta sian korpon per akvo. 7 Post la subiro
de la suno li fariĝos pura, kaj tiam li povas manĝi la
sanktaĵojn, ĉar tio estas lia manĝaĵo. 8 Kadavraĵon
kaj ion, kion disŝiris bestoj, li ne manĝu, por ke li
ne malpuriĝu per tio: Mi estas la Eternulo. 9 Kaj ili
observu Miajn ordonojn, por ke ili ne portu sur si
pekon kaj ne mortu en ĝi, se ili tion malhonoros:
Mi estas la Eternulo, kiu ilin sanktigas. 10 Kaj neniu
laiko manĝu sanktaĵon; loĝanto ĉe pastro kaj ankaŭ
dungito ne manĝu sanktaĵon. 11 Se pastro aĉetis
homon per sia mono, tiu povas manĝi tion; kaj tiuj,
kiuj naskiĝis en lia domo, povas manĝi lian panon.
12 Se filino de pastro edziniĝis kun viro laika, ŝi ne
manĝu el la levataj sanktaĵoj. 13 Sed se filino de
pastro fariĝis vidvino aŭ eksedzino kaj ŝi ne havas
infanojn, kaj ŝi revenis en la domon de sia patro,
kiel ŝi estis en sia juneco, tiam ŝi povas manĝi la
panon de sia patro; sed neniu laiko devas ĝin manĝi.
14 Se iu manĝis sanktaĵon per eraro, li aldonu al
ĝi kvinonon de la valoro kaj redonu al la pastro la
sanktaĵon. 15 Ili ne malhonoru la sanktaĵojn de la
Izraelidoj, kiujn ili oferlevas al la Eternulo. 16 Kaj ili
ne ŝarĝu sur sin la kulpon de la krimo, manĝante
siajn sanktaĵojn; ĉar Mi estas la Eternulo, kiu ilin
sanktigas. 17 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo,
dirante: 18 Parolu al Aaron kaj al liaj filoj kaj al ĉiuj
Izraelidoj, kaj diru al ili: Se iu el la domo de Izrael aŭ
el la fremduloj inter Izrael alportas sian oferon, ĉu
ĝi estas promesitaĵo aŭ ĉu ĝi estas ofero memvola,
kiun ili alportas al la Eternulo kiel bruloferon, 19
tiam, por ke vi akiru plaĉon, ĝi devas esti sendifekta,
virseksa, el grandaj brutoj, el ŝafoj, aŭ el kaproj. 20
Neniun beston, kiu havas difektaĵon, alportu, ĉar ĝi ne
akirigos al vi plaĉon. 21 Kaj se iu alportas pacoferon al
la Eternulo, por plenumi promeson aŭ memvole, el
grandaj aŭ malgrandaj brutoj, ĝi estu sendifekta, por
ke ĝi plaĉu; nenia difekto estu sur ĝi. 22 Beston blindan
aŭ difektitan aŭ kriplan aŭ absceshavan aŭ aknohavan
aŭ favan ne alportu al la Eternulo; kaj ne donu ilin
kiel fajroferon sur la altaron de la Eternulo. 23 Bovon
aŭ ŝafon, kiu havas tro longajn aŭ tro mallongajn
membrojn, vi povas alporti kiel oferon memvolan, sed
kiel promesita ofero ĝi ne akiros plaĉon. 24 Beston,
kiu havas testikon kunpremitan, disbatitan, deŝiritan,
aŭ fortranĉitan, ne alportu al la Eternulo, kaj en via
lando ne faru tion. 25 Kaj el la manoj de alilandulo
ne alportu tiajn kiel panon de via Dio; ĉar kriplaĵo
estas sur ili, difektaĵo estas sur ili: ili ne akiros al vi
plaĉon. 26 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante:
27 Kiam naskiĝos bovido aŭ ŝafido aŭ kaprido, tiam ĝi
restu dum sep tagoj sub sia patrino, kaj de post la oka
tago kaj plue ĝi povas akiri plaĉon kiel fajrofero al la
Eternulo. 28 Sed nek bovon, nek ŝafon buĉu kun ĝia
ido en unu tago. 29 Se vi alportas dankoferon al la
Eternulo, oferu ĝin tiel, ke ĝi akiru por vi plaĉon. 30
En la sama tago oni devas ĝin manĝi; ne lasu iom el ĝi
ĝis la mateno: Mi estas la Eternulo. 31 Kaj observu
Miajn ordonojn kaj plenumu ilin: Mi estas la Eternulo.
32 Kaj ne malhonoru Mian sanktan nomon, kaj Mi estu
sankta inter la Izraelidoj: Mi estas la Eternulo, kiu
sanktigas vin, 33 kiu elkondukis vin el la lando Egipta,
por esti por vi Dio. Mi estas la Eternulo.

23 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2
Parolu al la Izraelidoj, kaj diru al ili: La festoj de
la Eternulo, kiujn vi nomos sanktaj kunvenoj, jen ili

estas, Miaj festoj. 3 Dum ses tagoj faru laboron; sed la
sepan tagon estas sabato de ripozo, sankta kunveno,
nenian laboron faru; ĝi estu sabato al la Eternulo en
ĉiuj viaj loĝejoj. 4 Jen estas la festoj de la Eternulo,
sanktaj kunvenoj, kiujn vi kunvokados en ilia tempo: 5
en la unua monato, en la dek-kvara tago de la monato,
ĉirkaŭ la vespero, estas Pasko al la Eternulo. 6 Kaj
en la dek-kvina tago de tiu monato estas la festo de
macoj al la Eternulo; dum sep tagoj manĝu macojn. 7
En la unua tago estu ĉe vi sankta kunveno, faru nenian
laboron. 8 Kaj alportadu fajroferojn al la Eternulo
dum sep tagoj; en la sepa tago estu sankta kunveno,
faru nenian laboron. 9 Kaj la Eternulo ekparolis al
Moseo, dirante: 10 Parolu al la Izraelidoj, kaj diru
al ili: Kiam vi venos en la landon, kiun Mi donas al
vi, kaj vi rikoltos ĝian rikolton, tiam alportu al la
pastro la unuan garbon el via rikolto. 11 Kaj li skuos
la garbon antaŭ la Eternulo, por ke vi akiru plaĉon;
en la morgaŭa tago post la festo la pastro ĝin skuos.
12 Kaj vi pretigu en la tago, kiam estos skuata via
garbo, sendifektan ŝafidon jaraĝan kiel bruloferon
al la Eternulo. 13 Kaj kun ĝi, kiel farunoferon, du
dekonojn de efo da delikata faruno, miksita kun
oleo, kiel fajroferon al la Eternulo, kiel agrablan
odoraĵon, kaj kun ĝi, kiel verŝoferon, kvaronon de
hino da vino. 14 Kaj panon kaj rostitajn grajnojn kaj
freŝajn grajnojn ne manĝu ĝis tiu tago mem, en kiu
vi alportos la oferon al via Dio; ĝi estu eterna leĝo
por viaj generacioj en ĉiuj viaj loĝejoj. 15 Kaj kalkulu
al vi de post la morgaŭa tago post la festo, de post
la tago, en kiu vi alportis la garbon por skuado, sep
plenajn semajnojn. 16 Ĝis la morgaŭa tago post la sepa
semajno kalkulu kvindek tagojn, kaj tiam vi alportos
novan farunoferon al la Eternulo. 17 El viaj loĝejoj
alportu du panojn de skuofero; el du dekonoj de efo
da delikata faruno ili estu; fermente ili estu bakitaj;
tio estos unuaj produktoj por la Eternulo. 18 Kaj
alportu kune kun la panoj sep ŝafidojn sendifektajn
jaraĝajn kaj unu bovidon kaj du virŝafojn; ili estu
brulofero al la Eternulo; kaj kune kun ili farunoferon
kaj verŝoferon, fajroferon, agrablan odoraĵon al la
Eternulo. 19 Pretigu ankaŭ unu kapron kiel pekoferon,
kaj du jaraĝajn ŝafidojn kiel pacoferon. 20 Kaj la
pastro skuu ilin kune kun la unuaproduktaj panoj
kiel skuoferon antaŭ la Eternulo, kun la du ŝafidoj;
ĝi estu sanktaĵo al la Eternulo por la pastro. 21 Kaj
proklamu en tiu tago: sankta kunveno estu ĉe vi,
faru nenian laboron; tio estu eterna leĝo en ĉiuj viaj
loĝejoj en viaj generacioj. 22 Kaj kiam vi rikoltos la
rikolton en via lando, ne rikoltu ĉion ĝis la rando
de via kampo dum via rikoltado, kaj la postrestaĵon
de via rikolto ne kolektu; por la malriĉulo kaj por la
fremdulo lasu tion: Mi estas la Eternulo, via Dio. 23
Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 24 Diru
al la Izraelidoj jene: En la sepa monato, en la unua
tago de la monato, estu ĉe vi festo, memorigado per
trumpetado, sankta kunveno. 25 Faru nenian laboron;
kaj alportu fajroferon al la Eternulo. 26 Kaj la Eternulo
ekparolis al Moseo, dirante: 27 Sed en la deka tago
de tiu sepa monato estu tago de pekliberigo, sankta
kunveno estu ĉe vi; kaj humiligu vian animon kaj
alportu fajroferon al la Eternulo. 28 Kaj faru nenian
laboron en tiu tago, ĉar ĝi estas tago de pekliberigo,
por pekliberigi vin antaŭ la Eternulo, via Dio. 29 Ĉiu
animo, kiu ne humiligos sin en tiu tago, ekstermiĝos
el inter sia popolo. 30 Se iu animo faros ian laboron
en tiu tago, Mi ekstermos tiun animon el inter ĝia
popolo. 31 Faru nenian laboron; ĝi estu eterna leĝo en
viaj generacioj en ĉiuj viaj loĝejoj. 32 Granda sabato ĝi
estu por vi; kaj humiligu viajn animojn; vespere en la
naŭa tago de la monato, de vespero ĝis vespero festu
vian sabaton. 33 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo,
dirante: 34 Diru al la Izraelidoj jene: Komencante de
la dek-kvina tago de tiu sepa monato estu festo de
laŭboj dum sep tagoj al la Eternulo. 35 En la unua tago
estu sankta kunveno, faru nenian laboron. 36 Dum sep
tagoj alportadu fajroferojn al la Eternulo; en la oka
tago estu ĉe vi sankta kunveno, kaj alportu fajroferon
al la Eternulo; ferma festo ĝi estas, faru nenian
laboron. 37 Tio estas la festoj de la Eternulo, kiujn
vi nomos sanktaj kunvenoj, por alporti fajroferon al
la Eternulo, bruloferon kaj farunoferon, buĉoferon
kaj verŝoferojn, ĉiun en ĝia tago; 38 krom la sabatoj
de la Eternulo kaj krom viaj donoj kaj krom ĉiuj viaj
promesoj, kaj krom ĉiuj viaj memvolaj oferoj, kiujn
vi donos al la Eternulo. 39 Kaj en la dek-kvina tago
de la sepa monato, kiam vi kolektos la produktaĵon
de la tero, festu la feston de la Eternulo dum sep
tagoj; en la unua tago estu festo kaj en la oka tago
estu festo. 40 Kaj prenu al vi en la unua tago fruktojn
de belaj arboj, branĉojn de palmoj kaj branĉojn de
densaj arboj kaj de apudriveraj salikoj; kaj gajigu vin
antaŭ la Eternulo, via Dio, dum sep tagoj. 41 Kaj festu
tiun feston de la Eternulo dum sep tagoj en la jaro;

eterna leĝo tio estu en viaj generacioj; en la sepa
monato festu ĝin. 42 En laŭboj loĝu dum sep tagoj,
ĉiu indiĝeno en Izrael loĝu en laŭboj; 43 por ke sciu
viaj generacioj, ke en laŭboj Mi loĝigis la Izraelidojn,
kiam Mi elkondukis ilin el la lando Egipta: Mi estas la
Eternulo, via Dio. 44 Kaj Moseo diris pri la festoj de la
Eternulo al la Izraelidoj.

**24** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2
Ordonu al la Izraelidoj, ke ili alportadu al vi
oleon olivan, puran, pistitan, por lumigado, por ke
lucerno brulu ĉiam. 3 Ekster la kurteno de la atesto en
la tabernaklo de kunveno Aaron ĝin ĉiam aranĝadu
de vespero ĝis mateno antaŭ la Eternulo; tio estu
eterna leĝo en viaj generacioj. 4 Sur la pure ora
kandelabro li aranĝadu la lumojn antaŭ la Eternulo
ĉiam. 5 Kaj prenu delikatan farunon kaj baku el ĝi
dek du panojn; el du dekonoj de efo estu ĉiu pano;
6 kaj aranĝu ilin en du vicoj, po ses en vico, sur la
pure ora tablo antaŭ la Eternulo. 7 Kaj metu sur
ĉiun vicon puran olibanon, kaj tio estos ĉe la pano
memorofero, fajrofero al la Eternulo. 8 En ĉiu tago
sabata oni ĉiam aranĝu tion antaŭ la Eternulo; de la
Izraelidoj ĝi estu eterna interligo. 9 Kaj ĝi estu por
Aaron kaj por liaj filoj, kaj ili manĝu ĝin sur sankta
loko, ĉar tio estas plejsanktaĵo por li el la fajroferoj
de la Eternulo; tio estu eterna leĝo. 10 Kaj eliris iu
filo de virino Izraelida kaj de viro Egipta inter la
Izraelidojn, kaj en la tendaro la filo de la Izraelidino
ekkverelis kun Izraelido; 11 kaj la filo de la Izraelidino
insultis la nomon de Dio kaj blasfemis; kaj oni venigis
lin al Moseo. La nomo de lia patrino estis Ŝelomit,
filino de Dibri el la tribo de Dan. 12 Kaj oni metis lin
en malliberejon, ĝis oni ricevos precizan decidon de
la Eternulo. 13 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo,
dirante: 14 Elirigu la blasfeminton ekster la tendaron;
kaj ĉiuj, kiuj aŭdis, metu siajn manojn sur lian kapon,
kaj la tuta komunumo mortigu lin per ŝtonoj. 15 Kaj
al la Izraelidoj diru jene: Ĉiu, kiu blasfemos sian Dion,
portos sian pekon. 16 Kiu insultas la nomon de la
Eternulo, tiu estu mortigita; per ŝtonoj mortigu lin
la tuta komunumo. Ĉu fremdulo, ĉu indiĝeno, se li
blasfemos la nomon de la Eternulo, estu mortigita. 17
Se iu mortigos iun homon, oni lin mortigu. 18 Kiu
mortigos bruton, tiu pagu pro ĝi: beston pro besto. 19
Se iu faris difekton al sia proksimulo, oni faru al li tiel,
kiel li faris: 20 rompon pro rompo, okulon pro okulo,
denton pro dento; kian difekton li faris al homo, tian
oni faru al li. 21 Kaj kiu mortigis bruton, pagu pro ĝi;
sed kiu mortigis homon, estu mortigita. 22 La sama
juĝo estu ĉe vi ĉu por fremdulo, ĉu por indiĝeno; ĉar
Mi estas la Eternulo, via Dio. 23 Kaj Moseo diris al la
Izraelidoj, kaj oni elirigis la blasfeminton ekster la
tendaron kaj mortigis lin per ŝtonoj; kaj la Izraelidoj
faris, kiel la Eternulo ordonis al Moseo.

**25** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo sur la monto
Sinaj, dirante: 2 Parolu al la Izraelidoj, kaj diru
al ili: Kiam vi venos en la landon, kiun Mi donas
al vi, tiam la tero ripozu sabaton al la Eternulo. 3
Dum ses jaroj prisemu vian kampon kaj dum ses
jaroj pritranĉu vian vinberĝardenon kaj kolektu iliajn
produktaĵojn; 4 sed en la sepa jaro estu sabato de
ripozo por la tero, sabato al la Eternulo: vian kampon
ne prisemu kaj vian vinberĝardenon ne pritranĉu. 5
Kio mem elkreskos post via rikolto, tion ne rikoltu, kaj
la vinberojn de viaj nepritranĉitaj branĉoj ne deprenu:
tio estu jaro de ripozo por la tero. 6 Kaj la produktaĵoj
de la sabata tero estu manĝaĵo por vi ĉiuj: por vi, por
via sklavo, por via sklavino, kaj por via dungito kaj
por via kunloĝanto, kiuj loĝas ĉe vi. 7 Kaj por via
bruto kaj por la bestoj, kiuj estas sur via tero, ĉiuj ĝiaj
produktaĵoj estu kiel manĝaĵo. 8 Kaj kalkulu al vi sep
sabatajn jarojn, sep fojojn po sep jaroj, ke vi havu en
la sep sabataj jaroj kvardek naŭ jarojn. 9 Kaj proklamu
per trumpetado en la sepa monato, en la deka tago de
la monato; en la tago de pekliberigo trumpetu en via
tuta lando. 10 Kaj sanktigu la kvindekan jaron, kaj
proklamu liberecon en la lando por ĉiuj ĝiaj loĝantoj:
jubileo ĝi estu por vi; kaj revenu ĉiu al sia posedaĵo,
kaj ĉiu revenu al sia familio. 11 Jubileo ĝi estu por vi,
la kvindeka jaro; ne semu, kaj ne rikoltu tion, kio mem
elkreskis, kaj ne deprenu la berojn de la nepritranĉitaj
vinberbranĉoj. 12 Ĉar jubileo ĝi estas, sankta ĝi estu
por vi; de la kampo manĝu ĝiajn produktaĵojn. 13
En tiu jubilea jaro ĉiu revenu al sia posedaĵo. 14 Kaj
se vi ion vendos al via proksimulo, aŭ se vi aĉetos
el la manoj de via proksimulo, unu ne malprofitigu
la alian. 15 Laŭ la kalkulo de la jaroj post la jubileo
aĉetu de via proksimulo; laŭ la kalkulo de la jaroj de
produktado li vendu al vi. 16 Laŭ la multeco de la jaroj
pligrandigu la prezon, kaj ju pli malmultaj estas la
jaroj, des pli malgrandigu la prezon; ĉar la nombron
de la rikoltoj li vendas al vi. 17 Kaj ne malprofitigu

unu la alian, kaj timu vian Dion; ĉar Mi estas la
Eternulo, via Dio. 18 Kaj plenumu Miajn leĝojn, kaj
Miajn decidojn observu kaj plenumu ilin, kaj tiam vi
loĝos en la lando sendanĝere. 19 Kaj la tero donados
siajn fruktojn, kaj vi manĝados ĝissate, kaj vi loĝos sur
ĝi sendanĝere. 20 Kaj se vi diros: Kion ni manĝos en la
sepa jaro, kiam ni ne semos kaj ne enkolektos niajn
produktaĵojn? 21 Mi sendos al vi Mian benon en la sesa
jaro, kaj ĝi alportos produktaĵojn por tri jaroj. 22 Kaj
vi semos en la oka jaro, sed vi manĝos la produktaĵojn
malnovajn ĝis la naŭa jaro; ĝis venos la rikolto de ĝiaj
produktaĵoj, vi manĝos malnovajn. 23 Kaj la tero ne
estu vendata por ĉiam; ĉar al Mi apartenas la tero, ĉar
vi estas fremduloj kaj pasloĝantoj ĉe Mi. 24 Kaj sur la
tuta tero de via posedado permesu liberigon de la
tero. 25 Se via frato malriĉiĝos kaj vendos ion de sia
posedaĵo, sed venos reaĉetanto, lia proksima parenco,
tiam li povu reaĉeti la venditaĵon de sia frato. 26
Kaj se iu ne trovos por si reaĉetanton, sed li mem
fariĝos sufiĉe bonstata, kaj havos tiom, ke li povos
reaĉeti, 27 tiam li kalkulu la jarojn de la venditeco,
kaj la restaĵojn li redonu al tiu, al kiu li vendis; kaj li
revenu al sia posedado. 28 Sed se li ne havos sufiĉe,
por redoni al li, tiam lia venditaĵo restu en la manoj
de la aĉetinto ĝis la jubilea jaro; sed en la jubilea jaro
ĝi foriru, kaj li revenu al sia posedado. 29 Kaj se iu
vendos loĝeblan domon en urbo, kiun ĉirkaŭas muro,
tiam ĝi estas reaĉetebla ĝis la fino de jaro post ĝia
vendo; en la daŭro de jaro ĝi estas reaĉetebla. 30 Sed
se ĝi ne estos reaĉetita antaŭ la fino de tuta jaro,
tiam la domo, kiu estas en urbo ĉirkaŭita de muro,
restas por ĉiam ĉe ĝia aĉetinto en liaj generacioj; ĝi
ne foriras en jaro jubilea. 31 La domoj en la vilaĝoj ne
ĉirkaŭitaj de muro estu kalkulataj kiel kampo da tero;
oni povas ilin reaĉeti, kaj en jubilea jaro ili foriras.
32 Koncerne la urbojn de la Levidoj, la domojn en
la urboj de ilia posedado, la Levidoj ĉiam havas la
rajton de reaĉeto. 33 Se iu elaĉetos ion de la Levidoj,
tiam la vendita domo aŭ la urba posedaĵo foriras en la
jubilea jaro; ĉar la domoj en la urboj de la Levidoj
estas ilia posedaĵo inter la Izraelidoj. 34 Kaj la kampoj
ĉirkaŭ iliaj urboj ne estu vendataj, ĉar tio estas ilia
porĉiama posedaĵo. 35 Se via frato malriĉiĝos kaj lia
brako malfortiĝos apud vi, tiam subtenu lin; ĉu li estas
fremdulo, ĉu pasloĝanto, li vivu kun vi. 36 Ne prenu
de li procentojn nek alkreskon, kaj timu vian Dion,
ke via frato vivu kun vi. 37 Donante al li monon, ne
postulu de li procentojn, kaj donante al li manĝaĵon,
ne postulu ĝian pligrandigon. 38 Mi estas la Eternulo,
via Dio, kiu elkondukis vin el la lando Egipta, por
doni al vi la landon Kanaanan, por esti via Dio. 39
Kiam malriĉiĝos apud vi via frato kaj li estos vendita
al vi, tiam ne ŝarĝu lin per laborado sklava; 40 kiel
dungito, kiel pasloĝanto li estu ĉe vi; ĝis la jubilea
jaro li servu ĉe vi; 41 kaj tiam li foriru de vi, li mem
kaj ankaŭ liaj filoj kun li, kaj li revenu al sia familio
kaj al la posedaĵo de siaj patroj. 42 Ĉar ili estas Miaj
sklavoj, kiujn Mi elkondukis el la lando Egipta; ili ne
estu vendataj, kiel oni vendas sklavojn. 43 Ne regu ilin
kun krueleco, kaj timu vian Dion. 44 Via sklavo kaj via
sklavino, kiujn vi povas havi, devas esti el la popoloj,
kiuj estas ĉirkaŭ vi; el ili aĉetu sklavon kaj sklavinon.
45 Ankaŭ el la idoj de la pasloĝantoj, kiuj fremdule
loĝas ĉe vi, el ili vi povas aĉeti, kaj el iliaj familioj, kiuj
estas ĉe vi kaj kiuj naskiĝis en via lando; ili povas esti
via posedaĵo. 46 Kaj vi povas transdoni ilin herede
al viaj filoj post vi kiel porĉiaman posedaĵon; ilin vi
povas uzi kiel sklavojn, sed super viaj fratoj, super
Izraelidoj, ne regu unuj super aliaj kun krueleco. 47
Kaj se fremdulo aŭ pasloĝanto ĉe vi estos bonstata,
kaj via frato malriĉiĝos antaŭ li kaj vendos sin al la
fremdulo aŭ pasloĝanto ĉe vi aŭ al ido de familio de
fremdulo: 48 post la vendo restas al li rajto de elaĉeto;
iu el liaj fratoj elaĉetu lin. 49 Aŭ lia onklo, aŭ filo de lia
onklo elaĉetu lin, aŭ iu el lia parencaro, el lia familio
elaĉetu lin; aŭ se lia stato sufiĉos, li mem sin elaĉetos.
50 Kaj li faru prikalkulon kun sia aĉetinto, de la jaro,
en kiu li sin vendis, ĝis la jaro jubilea; kaj la mono, pro
kiu li vendis sin, devas esti redonita laŭ la nombro de
la jaroj; kiel dungito li estu ĉe li. 51 Se restas ankoraŭ
multe da jaroj, tiam proporcie al ili li redonu elaĉeton
pro si el la mono, pro kiu li estis aĉetita. 52 Se restas
malmulte da jaroj ĝis la jubilea jaro, tiam li kalkulu
tion al li kaj proporcie al la jaroj li redonu pro si
elaĉeton. 53 Kiel laŭjara dungito li estu ĉe li, kaj ĉi tiu
ne regu lin kruele antaŭ viaj okuloj. 54 Kaj se li ne
elaĉetiĝos tiamaniere, tiam li foriru en la jubilea jaro,
li kune kun siaj infanoj. 55 Ĉar Miaj sklavoj estas la
Izraelidoj; ili estas Miaj sklavoj, kiujn Mi elkondukis el
la lando Egipta: Mi estas la Eternulo, via Dio.

**26** Ne faru al vi idolojn, kaj figurojn kaj statuojn ne
starigu ĉe vi, kaj ŝtonojn kun bildoj ne kuŝigu en
via lando, por adorkliniĝi super ili: ĉar Mi estas la

Eternulo, via Dio. 2 Miajn sabatojn observu, kaj Mian
sanktejon respektegu: Mi estas la Eternulo. 3 Se vi
agos laŭ Miaj leĝoj kaj observos Miajn ordonojn kaj
plenumos ilin, 4 tiam Mi donos al vi pluvojn iliatempe,
kaj la tero donos siajn produktaĵojn, kaj la kampa
arbo donos siajn fruktojn. 5 Kaj la tempo de draŝado
daŭros ĉe vi ĝis la enkolektado de la vinberoj, kaj la
enkolektado de vinberoj daŭros ĝis la semado, kaj vi
manĝos vian panon sate kaj vi loĝos sendanĝere en via
lando. 6 Kaj Mi donos pacon al via lando, kaj kiam vi
kuŝos, neniu vin timigos; kaj Mi forigos la malbonajn
bestojn el la lando, kaj glavo ne trapasos vian landon.
7 Kaj vi pelos viajn malamikojn, kaj ili falos antaŭ vi
de glavo. 8 Kaj kvin al vi pelos centon, kaj cent el vi
pelos dekmilon; kaj viaj malamikoj falos antaŭ vi de
glavo. 9 Kaj Mi turnos Min al vi kaj kreskigos vin kaj
multigos vin, kaj Mi fortikigos Mian interligon kun
vi. 10 Kaj vi manĝos grenon malnovan pasintjaran,
kaj vi elportos la malnovan pro la nova. 11 Kaj Mi
starigos Mian loĝejon inter vi, kaj Mia animo vin ne
abomenos. 12 Kaj Mi iros inter vi, kaj Mi estos via Dio,
kaj vi estos Mia popolo. 13 Mi estas la Eternulo, via
Dio, kiu elkondukis vin el la lando Egipta, por ke vi
ne estu iliaj sklavoj; kaj Mi rompis la bastonojn de
via jugo kaj ekirigis vin kun levita kapo. 14 Sed se vi
ne obeos Min kaj ne faros ĉiujn ĉi tiujn ordonojn; 15
kaj se vi malestimos Miajn leĝojn kaj se via animo
abomenos Miajn decidojn, kaj vi ne plenumos ĉiujn
Miajn ordonojn, rompante Mian interligon: 16 tiam
ankaŭ Mi faros al vi tion: Mi sendos sur vin teruron,
maldikiĝon, kaj febron, kiuj konsumas la okulojn kaj
senfortigas la animon; kaj vi semos viajn semojn vane,
ilin manĝos viaj malamikoj. 17 Kaj Mi turnos Mian
vizaĝon kontraŭ vin, kaj vi falos antaŭ viaj malamikoj,
kaj regos vin viaj malamantoj, kaj vi kuros, kiam
neniu pelos vin. 18 Kaj se vi malgraŭ ĉi tio ne obeos
Min, tiam Mi sepoble pligrandigos la punon pro viaj
pekoj. 19 Kaj Mi rompos vian fieran obstinecon, kaj Mi
faros vian ĉielon kiel fero kaj vian teron kiel kupro. 20
Kaj vane konsumiĝos via forto; via tero ne donos siajn
produktaĵojn, kaj la arboj de la tero ne donos siajn
fruktojn. 21 Kaj se vi malgraŭ tio spitos Min kaj ne
volos obei Min, tiam Mi aldonos sepoble da frapoj
laŭ viaj pekoj. 22 Kaj Mi venigos sur vin la sovaĝajn
bestojn, kaj ili formanĝos viajn infanojn kaj ekstermos
viajn brutojn kaj malmultigos vin tiel, ke viaj vojoj
dezertiĝos. 23 Se ankaŭ per tio vi ne humiliĝos, sed
plue agos kontraŭ Mi: 24 tiam ankaŭ Mi agos kontraŭ
vi, kaj Mi ankaŭ frapos vin sepoble pro viaj pekoj.
25 Kaj Mi venigos sur vin venĝan glavon, kiu venĝos
pro la interligo; kaj vi kolektiĝos en viaj urboj, kaj Mi
sendos peston en vian mezon, kaj vi estos fordonitaj
en la manojn de la malamiko. 26 Kiam Mi rompos
al vi la apogon de la pano, tiam dek virinoj bakos
vian panon en unu forno kaj redonos vian panon
pesante, kaj vi manĝos kaj ne satiĝos. 27 Kaj se vi
malgraŭ tio ne obeos Min, kaj spitos Min: 28 tiam
Mi iros kontraŭ vin kolere, kaj Mi punos vin sepoble
pro viaj pekoj. 29 Kaj vi manĝos la karnon de viaj
filoj, kaj la karnon de viaj filinoj vi manĝos. 30 Kaj Mi
detruos viajn altaĵojn kaj ruinigos viajn kolonojn de la
suno, kaj Mi ĵetos viajn kadavrojn sur la rompitaĵojn
de viaj idoloj, kaj Mia animo abomenos vin. 31 Kaj
Mi faros el viaj urboj dezerton, kaj Mi ruinigos viajn
sanktejojn, kaj Mi ne flaros viajn agrablajn odoraĵojn.
32 Kaj Mi dezertigos la teron, ke miregos pri ĝi viaj
malamikoj, kiuj ekloĝos sur ĝi. 33 Kaj vin Mi disĵetos
inter la popolojn, kaj Mi nudigos post vi glavon; kaj
via tero estos dezerta kaj viaj urboj estos ruinigitaj.
34 Tiam la tero ricevos kontentigon pri siaj sabatoj
dum la tuta tempo de sia dezerteco, kiam vi estos en
la lando de viaj malamikoj; tiam ripozos la tero kaj
kontentigos sin pri siaj sabatoj. 35 Dum la tuta tempo
de dezerteco ĝi ripozos, kiom ĝi ne ripozis en viaj
sabatoj, kiam vi loĝis sur ĝi. 36 Kaj al la restintoj el vi
Mi sendos timon en ilian koron en la lando de iliaj
malamikoj; kaj pelos ilin brueto de falanta folio, kaj ili
kuros, kiel oni kuras de glavo, kaj ili falos, kiam neniu
ilin persekutos. 37 Kaj ili falos unu sur alian, kiel de
glavo, dum neniu ilin pelos; kaj vi ne havos forton por
stari antaŭ viaj malamikoj. 38 Kaj vi pereos inter la
popoloj, kaj formanĝos vin la lando de viaj malamikoj.
39 Kaj la restintoj el vi senfortiĝos pro siaj pekoj en la
landoj de viaj malamikoj, kaj ankaŭ pro la pekoj de
siaj patroj ili senfortiĝos. 40 Tiam ili konfesos sian
kulpon kaj la kulpon de siaj patroj en la malbonagoj,
kiujn ili faris kontraŭ Mi kaj pri kio ili spitis Min.
41 Ankaŭ Mi iris kontraŭ ilin kaj envenigis ilin en la
landon de iliaj malamikoj; kaj se tiam humiliĝos ilia
koro ne cirkumcidita kaj se ili donos kontentigon pri
siaj pekoj, 42 tiam Mi rememoros Mian interligon
kun Jakob, kaj Mian interligon kun Isaak kaj Mian
interligon kun Abraham Mi rememoros, kaj la landon
Mi rememoros. 43 La lando estos forlasita de ili kaj

ricevos kontentigon pri siaj sabatoj, kiam ĝi dezertiĝos
post ili; kaj ili donos kontentigon pri siaj kulpoj, ĉar
ili malrespektis Miajn decidojn kaj Miajn leĝojn ilia
animo abomenis. 44 Kaj tamen, kiam ili estos en la
lando de siaj malamikoj, Mi ne malestimos ilin, kaj
ne abomenos ilin tiom, por ekstermi ilin, por neniigi
Mian interligon kun ili; ĉar Mi estas la Eternulo, ilia
Dio. 45 Kaj Mi rememoros por ili la interligon kun
la antaŭuloj, kiujn Mi elkondukis el la lando Egipta
antaŭ la okuloj de la popoloj, por esti ilia Dio: Mi
estas la Eternulo. 46 Tio estas la leĝoj kaj decidoj
kaj instruoj, kiujn starigis la Eternulo inter Si kaj la
Izraelidoj sur la monto Sinaj per Moseo.

**27** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2
Parolu al la Izraelidoj, kaj diru al ili: Se iu faros
sanktan promeson dediĉi animon laŭ via taksado
al la Eternulo, 3 tiam via taksado devas esti: pro
virseksulo en la aĝo de dudek jaroj ĝis sesdek jaroj via
taksado estu kvindek sikloj da arĝento laŭ la sankta
siklo. 4 Kaj se tio estos virino, tiam via taksado estu
tridek sikloj. 5 Kaj se tio estos aĝulo de kvin jaroj ĝis
dudek jaroj, via taksado estu pro viro dudek sikloj
kaj pro virino dek sikloj. 6 Se tio estos aĝulo de unu
monato ĝis kvin jaroj, tiam via taksado estu pro viro
kvin sikloj da arĝento kaj pro virino via taksado estu
tri sikloj da arĝento. 7 Kaj se en la aĝo de sesdek
jaroj kaj pli, tiam, se tio estos viro, via taksado estu
dek kvin sikloj kaj pro virino dek sikloj. 8 Kaj se li
estas tro malriĉa por tia taksado, tiam oni starigu lin
antaŭ la pastro kaj la pastro taksu lin: konforme al la
bonhaveco de la promesinto la pastro lin taksu. 9 Se
tio estas bruto el tiaj, kiajn oni ofere alportas al la
Eternulo, tiam ĉio, kio estas donita al la Eternulo, estu
sankta. 10 Oni ne devas ĝin ŝanĝi nek anstataŭigi ĝin,
bonan per malbona aŭ malbonan per bona; se tamen
iu anstataŭigos bruton per bruto, tiam ĝi kaj ankaŭ
ĝia anstataŭigito fariĝu konsekrita. 11 Se tio estas ia
bruto malpura, el tiaj, kiajn oni ne alportas ofere al la
Eternulo, tiam oni starigu la bruton antaŭ la pastro; 12
kaj la pastro taksos ĝin, ĉu ĝi estas bona, ĉu malbona;
kiel taksos la pastro, tiel ĝi estu. 13 Se la promesinto
volos ĝin elaĉeti, li aldonu kvinonon al via takso. 14 Se
iu dediĉos sian domon kiel sanktaĵon al la Eternulo,
tiam la pastro ĝin taksu, ĉu ĝi estas bona, ĉu malbona;
kiel la pastro ĝin taksos, tiel ĝi restu. 15 Sed se la
dediĉinto volos elaĉeti sian domon, tiam li aldonu
kvinonon de la mono de via takso, kaj ĝi restos lia. 16
Se el sia posedata kampo iu dediĉos ion al la Eternulo,
tiam via taksado devas esti proporcia al ĝia semitaĵo:
pro semitaĵo en la kvanto de ĥomero da hordeo estu
la takso kvindek sikloj da arĝento. 17 Se de jubilea
jaro li dediĉas sian kampon, tiam la afero restu laŭ
via taksado. 18 Sed se post la jubilea jaro li dediĉos
sian kampon, tiam la pastro kalkulu al li la monon
laŭ la jaroj, kiuj restas ĝis la jubilea jaro, kaj tion oni
deprenu de via takso. 19 Se la dediĉinto volos elaĉeti
la kampon, tiam li aldonu kvinonon de la mono laŭ
via taksado, kaj ĝi restos lia. 20 Sed se li ne elaĉetos
la kampon kaj la kampo estos vendita al alia homo,
tiam ĝi ne estos plu elaĉetebla. 21 Kaj tiu kampo,
kiam ĝi foriros en la jubilea jaro, estos konsekrita al la
Eternulo, kiel kampo priĵurita: ĝi fariĝos posedaĵo de
la pastro. 22 Kaj se iu dediĉos al la Eternulo kampon,
kiun li aĉetis kaj kiu ne estas el la kampoj de lia
hereda posedaĵo, 23 tiam la pastro kalkulu al li la
takson ĝis la jubilea jaro, kaj li donu la takson en
tiu tago, kiel konsekritaĵon al la Eternulo. 24 En la
jubilea jaro la kampo revenos al tiu, de kiu oni ĝin
aĉetis, al kiu apartenas hereda posedado de tiu tero.
25 Ĉiu via taksado estu laŭ la sankta siklo: el dudek
geroj konsistu la siklo. 26 Nur unuenaskiton, kiu el la
brutoj apartenas al la Eternulo pro sia unuenaskiteco,
neniu dediĉu: ĉu ĝi estas bovo, ĉu ĝi estas ŝafo, ĝi
apartenas al la Eternulo. 27 Se ĝi estas bruto malpura,
tiam oni devas elaĉeti ĝin laŭ via taksado kaj aldoni
al la valoro kvinonon; se ĝi ne estos elaĉetita, oni
vendu ĝin laŭ via taksado. 28 Nur ĉio konsekrita, kion
iu konsekris al la Eternulo, el ĉio, kio apartenas al
li, ĉu ĝi estas homo, ĉu bruto, ĉu posedata kampo,
ne estu vendata nek elaĉetata. Ĉio konsekrita estas
plejsanktaĵo de la Eternulo. 29 Ĉiu konsekrita, kiu
estos konsekrita el la homoj, ne estu elaĉetita; li devas
morti. 30 Ĉiu dekonaĵo el la tero, el la semitaĵo de la
tero, el la fruktoj de la arboj apartenas al la Eternulo;
ĝi estas sanktaĵo de la Eternulo. 31 Se iu volos elaĉeti
ion el sia dekonaĵo, li aldonu al la valoro kvinonon. 32
Kaj ĉiu dekono el la bovoj kaj ŝafoj, el ĉio, kio pasas
sub la bastono de paŝtanto, la deka estu konsekrita
al la Eternulo. 33 Oni ne devas esplori, ĉu ĝi estas
bona aŭ malbona, kaj oni ĝin devas ne anstataŭigi;
se iu ĝin anstataŭigos, tiam ĝi kaj ĝia anstataŭaĵo
estu sanktaĵoj kaj ne estu elaĉetataj. 34 Tio estas la

ordonoj, kiujn la Eternulo ordonis al Moseo por la Izraelidoj sur la monto Sinaj.

# Nombroj

1 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo en la dezerto
Sinaj en la tabernaklo de kunveno en la unua
tago de la dua monato de la dua jaro post ilia eliro
el la lando Egipta, dirante: 2 Prikalkulu la tutan
komunumon de la Izraelidoj laŭ iliaj familioj, laŭ
iliaj patrodomoj, laŭ la nombro de la nomoj de ĉiuj
virseksuloj laŭkape. 3 De la aĝuloj de dudek jaroj kaj
pli, ĉiujn, kiuj taŭgas por milito en Izrael, prikalkulu
ilin laŭ iliaj taĉmentoj, vi kaj Aaron. 4 Kaj kun vi estu
po unu homo el ĉiu tribo, homo, kiu estas ĉefo en sia
patrodomo. 5 Kaj jen estas la nomoj de la viroj, kiuj
staros kun vi: de Ruben staru Elicur, filo de Ŝedeur; 6
de Simeon, Ŝelumiel, filo de Curiŝadaj; 7 de Jehuda,
Naĥŝon, filo de Aminadab; 8 de Isaĥar, Netanel, filo
de Cuar; 9 de Zebulun, Eliab, filo de Ĥelon; 10 de la
filoj de Jozef: de Efraim, Eliŝama, filo de Amihud; de
Manase, Gamliel, filo de Pedacur; 11 de Benjamen,
Abidan, filo de Gideoni; 12 de Dan, Aĥiezer, filo de
Amiŝadaj; 13 de Aŝer, Pagiel, filo de Oĥran; 14 de Gad,
Eljasaf, filo de Deuel; 15 de Naftali, Aĥira, filo de Enan.
16 Tio estas la distingitoj el la komunumo, la estroj de
la triboj de siaj patroj, la ĉefoj de la miloj de Izrael. 17
Kaj Moseo kaj Aaron prenis tiujn virojn, cititajn laŭ
iliaj nomoj. 18 Kaj la tutan komunumon ili kunvenigis
en la unua tago de la dua monato; kaj la kunvenintoj
legitimis sin laŭ siaj familioj, laŭ siaj patrodomoj, laŭ
la nombroj de la nomoj, de la aĝuloj de dudek jaroj kaj
pli, laŭkape, 19 kiel la Eternulo ordonis al Moseo. Kaj
li prikalkulis ilin en la dezerto Sinaj. 20 Kaj montriĝis,
ke la filoj de Ruben, la unuenaskito de Izrael, laŭ sia
deveno, laŭ siaj familioj, laŭ siaj patrodomoj, laŭ la
nombro da nomoj laŭkape, ĉiuj virseksuloj en la aĝo
de dudek jaroj kaj pli, ĉiuj militkapablaj, 21 prezentis
en la tribo de Ruben la nombron de kvardek ses mil
kvincent. 22 La filoj de Simeon laŭ sia deveno, laŭ
siaj familioj, laŭ siaj patrodomoj, kalkulitaj laŭ la
nombro da nomoj laŭkape, ĉiuj virseksuloj en la aĝo
de dudek jaroj kaj pli, ĉiuj militkapablaj, 23 prezentis
en la tribo de Simeon la nombron de kvindek naŭ
mil tricent. 24 La filoj de Gad laŭ sia deveno, laŭ siaj
familioj, laŭ siaj patrodomoj, laŭ la nombro da nomoj,
en la aĝo de dudek jaroj kaj pli, ĉiuj militkapablaj, 25
prezentis en la tribo de Gad la nombron de kvardek
kvin mil sescent kvindek. 26 La filoj de Jehuda laŭ sia
deveno, laŭ siaj familioj, laŭ siaj patrodomoj, laŭ la
nombro da nomoj, en la aĝo de dudek jaroj kaj pli,
ĉiuj militkapablaj, 27 prezentis en la tribo de Jehuda
la nombron de sepdek kvar mil sescent. 28 La filoj
de Isaĥar laŭ sia deveno, laŭ siaj familioj, laŭ siaj
patrodomoj, laŭ la nombro da nomoj, en la aĝo de
dudek jaroj kaj pli, ĉiuj militkapablaj, 29 prezentis en
la tribo de Isaĥar la nombron de kvindek kvar mil
kvarcent. 30 La filoj de Zebulun laŭ sia deveno, laŭ siaj
familioj, laŭ siaj patrodomoj, laŭ la nombro da nomoj,
en la aĝo de dudek jaroj kaj pli, ĉiuj militkapablaj,
31 prezentis en la tribo de Zebulun la nombron de
kvindek sep mil kvarcent. 32 La filoj de Jozef, la filoj
de Efraim laŭ sia deveno, laŭ siaj familioj, laŭ siaj
patrodomoj, laŭ la nombro da nomoj, en la aĝo de
dudek jaroj kaj pli, ĉiuj militkapablaj, 33 prezentis
en la tribo de Efraim la nombron de kvardek mil
kvincent. 34 La filoj de Manase laŭ sia deveno, laŭ siaj
familioj, laŭ siaj patrodomoj, laŭ la nombro da nomoj,
en la aĝo de dudek jaroj kaj pli, ĉiuj militkapablaj,
35 prezentis en la tribo de Manase la nombron de
tridek du mil ducent. 36 La filoj de Benjamen laŭ
sia deveno, laŭ siaj familioj, laŭ siaj patrodomoj, laŭ
la nombro da nomoj, en la aĝo de dudek jaroj kaj
pli, ĉiuj militkapablaj, 37 prezentis en la tribo de
Benjamen la nombron de tridek kvin mil kvarcent. 38
La filoj de Dan laŭ sia deveno, laŭ siaj familioj, laŭ siaj
patrodomoj, laŭ la nombro da nomoj, en la aĝo de
dudek jaroj kaj pli, ĉiuj militkapablaj, 39 prezentis en
la tribo de Dan la nombron de sesdek du mil sepcent.
40 La filoj de Aŝer laŭ sia deveno, laŭ siaj familioj, laŭ
siaj patrodomoj, laŭ la nombro da nomoj, en la aĝo de
dudek jaroj kaj pli, ĉiuj militkapablaj, 41 prezentis
en la tribo de Aŝer la nombron de kvardek unu mil
kvincent. 42 La filoj de Naftali laŭ sia deveno, laŭ siaj
familioj, laŭ siaj patrodomoj, laŭ la nombro da nomoj,
en la aĝo de dudek jaroj kaj pli, ĉiuj militkapablaj,
43 prezentis en la tribo de Naftali la nombron de
kvindek tri mil kvarcent. 44 Tio estas la kalkulitoj,
kiujn kalkulis Moseo kaj Aaron kaj la princoj de Izrael,
dek du homoj, po unu el ĉiu patrodomo. 45 Kaj la
nombro de ĉiuj kalkulitoj el la Izraelidoj laŭ iliaj
patrodomoj, en la aĝo de dudek jaroj kaj pli, ĉiuj
militkapablaj en Izrael, 46 la nombro de ĉiuj kalkulitoj
estis sescent tri mil kvincent kvindek. 47 Sed la Levidoj
laŭ sia patrodomo ne estis kalkulitaj inter ili. 48 Ĉar la
Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 49 Nur la tribon
de Levi ne prikalkulu, kaj ne metu ilian nombron

mezen de la Izraelidoj. 50 Sed vi komisiu al la Levidoj
la tabernaklon de atesto kaj ĉiujn ĝiajn objektojn, kaj
ĉion, kio apartenas al ĝi; ili portadu la tabernaklon kaj
ĉiujn ĝiajn objektojn, kaj ili priservu ĝin, kaj ĉirkaŭ la
tabernaklo ili starigu siajn tendojn. 51 Kaj kiam la
tabernaklo devos forlasi sian lokon, tiam la Levidoj
ĝin levu; kaj kiam la tabernaklo devos resti sur loko,
tiam la Levidoj ĝin starigu; sed se laiko alproksimiĝos,
li estu mortigita. 52 Kaj la Izraelidoj aranĝos sin ĉiu
en sia tendaro kaj ĉiu apud sia standardo, laŭ siaj
taĉmentoj. 53 Sed la Levidoj starigu siajn tendojn
ĉirkaŭ la tabernaklo de atesto, por ke ne trafu kolero la
komunumon de la Izraelidoj; kaj la Levidoj plenumos
la gardadon de la tabernaklo de atesto. 54 Kaj tiel faris
la Izraelidoj; konforme al ĉio, kion la Eternulo ordonis
al Moseo, tiel ili faris.

**2** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo kaj al Aaron,
dirante: 2 La Izraelidoj starigu siajn tendojn ĉiu
apud sia standardo, apud la signoj de sia patrodomo;
iom malproksime ĉirkaŭ la tabernaklo de kunveno ili
starigu siajn tendojn. 3 En la antaŭa parto, oriente,
staros tendare la standardo de la tendaro de Jehuda,
laŭ iliaj taĉmentoj; kaj la princo de la Jehudaidoj estas
Naĥŝon, filo de Aminadab; 4 kaj lia taĉmento kaj ĝiaj
kalkulitoj estas sepdek kvar mil sescent. 5 Apude
staru la tribo de Isaĥar; kaj la princo de la Isaĥaridoj
estas Netanel, filo de Cuar; 6 kaj lia taĉmento kaj ĝiaj
kalkulitoj estas kvindek kvar mil kvarcent. 7 Poste
la tribo de Zebulun; kaj la princo de la Zebulunidoj
estas Eliab, filo de Ĥelon; 8 kaj lia taĉmento kaj
ĝiaj kalkulitoj estas kvindek sep mil kvarcent. 9 Ĉiuj
kalkulitoj de la tendaro de Jehuda estas cent okdek
ses mil kvarcent laŭ iliaj taĉmentoj; ili elmoviĝu la
unuaj. 10 La standardo de la tendaro de Ruben estu
sude, laŭ iliaj taĉmentoj; kaj la princo de la Rubenidoj
estas Elicur, filo de Ŝedeur; 11 kaj lia taĉmento kaj
ĝiaj kalkulitoj estas kvardek ses mil kvincent. 12
Apude staru la tribo de Simeon; kaj la princo de la
Simeonidoj estas Ŝelumiel, filo de Curiŝadaj; 13 kaj
lia taĉmento kaj ĝiaj kalkulitoj estas kvindek naŭ
mil tricent. 14 Poste la tribo de Gad; kaj la princo
de la Gadidoj estas Eljasaf, filo de Deuel; 15 kaj lia
taĉmento kaj ĝiaj kalkulitoj estas kvardek kvin mil
sescent kvindek. 16 Ĉiuj kalkulitoj de la tendaro de
Ruben estas cent kvindek unu mil kvarcent kvindek
laŭ iliaj taĉmentoj; ili elmoviĝu la duaj. 17 Poste
elmoviĝu kun la tabernaklo de kunveno la tendaro de
la Levidoj inter la tendaroj; kiel ili staros tendare, tiel
ili elmoviĝu, ĉiu laŭ sia loko kun siaj standardoj. 18 La
standardo de la tendaro de Efraim, laŭ iliaj taĉmentoj,
estu okcidente; kaj la princo de la Efraimidoj estas
Eliŝama, filo de Amihud; 19 kaj lia taĉmento kaj ĝiaj
kalkulitoj estas kvardek mil kvincent. 20 Apude estu
la tribo de Manase; kaj la princo de la Manaseidoj
estas Gamliel, filo de Pedacur; 21 kaj lia taĉmento kaj
ĝiaj kalkulitoj estas tridek du mil ducent. 22 Poste la
tribo de Benjamen; kaj la princo de la Benjamenidoj
estas Abidan, filo de Gideoni; 23 kaj lia taĉmento kaj
ĝiaj kalkulitoj estas tridek kvin mil kvarcent. 24 Ĉiuj
kalkulitoj de la tendaro de Efraim estas cent ok mil
cent laŭ iliaj taĉmentoj; ili elmoviĝu la triaj. 25 La
standardo de la tendaro de Dan estu norde, laŭ iliaj
taĉmentoj; kaj la princo de la Danidoj estas Aĥiezer,
filo de Amiŝadaj; 26 kaj lia taĉmento kaj ĝiaj kalkulitoj
estas sesdek du mil sepcent. 27 Apude staru tendare la
tribo de Aŝer; kaj la princo de la Aŝeridoj estas Pagiel,
filo de Oĥran; 28 kaj lia taĉmento kaj ĝiaj kalkulitoj
estas kvardek unu mil kvincent. 29 Poste la tribo de
Naftali; kaj la princo de la Naftaliidoj estas Aĥira,
filo de Enan; 30 kaj lia taĉmento kaj ĝiaj kalkulitoj
estas kvindek tri mil kvarcent. 31 Ĉiuj kalkulitoj de la
tendaro de Dan estas cent kvindek sep mil sescent; ili
elmoviĝu la lastaj kun siaj standardoj. 32 Tio estas la
kalkulitoj de la Izraelidoj laŭ iliaj patrodomoj. Ĉiuj
kalkulitoj de la tendaroj, laŭ iliaj taĉmentoj, estis
sescent tri mil kvincent kvindek. 33 Sed la Levidoj
ne estis kalkulitaj inter la Izraelidoj; kiel la Eternulo
ordonis al Moseo. 34 Kaj la Izraelidoj faris konforme al
ĉio, kion la Eternulo ordonis al Moseo: tiel ili stariĝis
tendare kun siaj standardoj, kaj tiel ili elmoviĝadis,
ĉiu laŭ sia familio, laŭ sia patrodomo.

**3** Kaj jen estas la genealogio de Aaron kaj Moseo
en tiu tempo, kiam la Eternulo parolis al Moseo
sur la monto Sinaj. 2 Jen estas la nomoj de la filoj de
Aaron: la unuenaskito Nadab, kaj Abihu, Eleazar, kaj
Itamar. 3 Tio estas la nomoj de la filoj de Aaron, la
pastroj sanktoleitaj, kiujn li konsekris por pastri. 4
Sed Nadab kaj Abihu mortis antaŭ la Eternulo, kiam ili
oferalportis fremdan fajron antaŭ la Eternulon en la
dezerto Sinaj; kaj filojn ili ne havis. Kaj pastris Eleazar
kaj Itamar apud Aaron ilia patro. 5 Kaj la Eternulo
ekparolis al Moseo, dirante: 6 Alvenigu la tribon de

Levi, kaj starigu ĝin antaŭ la pastro Aaron, ke ili
servu lin. 7 Kaj ili plenumu gardon koncerne lin kaj
koncerne la tutan komunumon antaŭ la tabernaklo de
kunveno, por servi la servojn de la tabernaklo. 8 Kaj
ili gardu ĉiujn objektojn de la tabernaklo de kunveno
kaj la gardotaĵon de la Izraelidoj, por servi la servojn
de la tabernaklo. 9 Kaj donu la Levidojn al Aaron kaj
al liaj filoj; ili estu fordonitaj al li el la Izraelidoj. 10 Kaj
Aaronon kaj liajn filojn oficialigu, ke ili plenumadu
sian pastradon; se laiko en tion enmiksiĝos, li estu
mortigita. 11 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo,
dirante: 12 Jen Mi prenis la Levidojn el inter la
Izraelidoj anstataŭ ĉiuj unuenaskitoj utermalfermintoj
el la Izraelidoj; la Levidoj estu do Miaj; 13 ĉar al
Mi apartenas ĉiuj unuenaskitoj; en la tago, en kiu
Mi batis ĉiujn unuenaskitojn en la lando Egipta, Mi
dediĉis al Mi ĉiujn unuenaskitojn en Izrael, de homo
ĝis bruto; Miaj ili estu: Mi estas la Eternulo. 14 Kaj
la Eternulo ekparolis al Moseo en la dezerto Sinaj,
dirante: 15 Prikalkulu la Levidojn laŭ iliaj patrodomoj,
laŭ iliaj familioj; ĉiun virseksulon en la aĝo de unu
monato kaj pli prikalkulu. 16 Kaj Moseo prikalkulis
ilin laŭ la diro de la Eternulo, kiel estis ordonite. 17
Kaj jenaj estis la filoj de Levi laŭ iliaj nomoj: Gerŝon
kaj Kehat kaj Merari. 18 Kaj jen estas la nomoj de
la filoj de Gerŝon laŭ iliaj familioj: Libni kaj Ŝimei.
19 Kaj la filoj de Kehat laŭ iliaj familioj: Amram kaj
Jichar, Ĥebron kaj Uziel. 20 Kaj la filoj de Merari laŭ
iliaj familioj: Maĥli kaj Muŝi. Tio estas la familioj de
Levi laŭ iliaj patrodomoj. 21 De Gerŝon la familio de
la Libniidoj kaj la familio de la Ŝimeiidoj; tio estas
la familioj de la Gerŝonidoj. 22 Iliaj kalkulitoj laŭ la
nombro de ĉiuj virseksuloj en la aĝo de unu monato
kaj pli prezentas la nombron de sep mil kvincent. 23
La familioj de la Gerŝonidoj devas havi siajn tendojn
malantaŭ la tabernaklo, okcidente. 24 Kaj la estro
de la patrodomo de la Gerŝonidoj estas Eljasaf, filo
de Lael. 25 Kaj sub la gardado de la Gerŝonidoj en
la tabernaklo de kunveno estas la tabernaklo, kaj la
tendo, ĝiaj kovriloj, kaj la kovrotuko de la pordo de la
tabernaklo de kunveno, 26 kaj la kurtenoj de la korto,
kaj la kovrotuko de la pordo de la korto, kiu estas
ĉirkaŭ la tabernaklo kaj ĉirkaŭ la altaro, kaj la ŝnuroj
kun ĉiuj aranĝaĵoj. 27 Kaj de Kehat estas la familio
de la Amramidoj kaj la familio de la Jicharidoj kaj la
familio de la Ĥebronidoj kaj la familio de la Uzielidoj;
tio estas la familioj de la Kehatidoj. 28 Laŭ la nombro
de ĉiuj virseksuloj en la aĝo de unu monato kaj pli
ili estas ok mil sescent, plenumantaj gardadon de la
sanktejo. 29 La familioj de la Kehatidoj devas havi
siajn tendojn flanke de la tabernaklo, sude. 30 Kaj la
estro de la patrodomo de la familioj de la Kehatidoj
estas Elcafan, filo de Uziel. 31 Kaj sub ilia gardado estu
la kesto kaj la tablo kaj la kandelabro kaj la altaroj, kaj
la sanktaj vazoj, per kiuj oni faras la servadon, kaj la
kurteno kaj ĉiuj ĝiaj apartenaĵoj. 32 Kaj la estro de
la estroj de la Levidoj estas Eleazar, filo de la pastro
Aaron; li kontrolas la plenumantojn de la gardado
de la sanktejo. 33 De Merari estas la familio de la
Maĥliidoj kaj la familio de la Muŝiidoj; tio estas la
familioj de Merari. 34 Kaj iliaj kalkulitoj laŭ la nombro
de ĉiuj virseksuloj en la aĝo de unu monato kaj pli
estas ses mil ducent. 35 Kaj la estro de la patrodomo
de la familioj de Merari estas Curiel, filo de Abiĥail;
ili devas havi siajn tendojn flanke de la tabernaklo,
norde. 36 Kaj sub la kontrolo kaj gardado de la filoj
de Merari estas la tabuloj de la tabernaklo kaj ĝiaj
stangoj kaj ĝiaj kolonoj kaj ĝiaj bazoj kaj ĉiuj ĝiaj vazoj
kaj ĝia tuta aranĝaĵo, 37 kaj la kolonoj de la korto
ĉirkaŭe kaj iliaj bazoj kaj iliaj najloj kaj iliaj ŝnuroj.
38 Kaj antaŭ la tabernaklo, en la antaŭa parto de la
tabernaklo de kunveno, oriente, havos siajn tendojn
Moseo kaj Aaron kaj liaj filoj, plenumante la gardadon
de la sanktejo, por gardi la Izraelidojn; sed se laiko
alproksimiĝos, li estu mortigita. 39 Ĉiuj kalkulitaj
Levidoj, kiujn prikalkulis Moseo kaj Aaron laŭ la
ordono de la Eternulo, laŭ iliaj familioj, ĉiuj virseksuloj
en la aĝo de unu monato kaj pli, estis dudek du mil.
40 Kaj la Eternulo diris al Moseo: Prikalkulu ĉiujn
unuenaskitajn virseksulojn inter la Izraelidoj en la
aĝo de unu monato kaj pli, kaj faru registron de iliaj
nomoj. 41 Kaj prenu la Levidojn por Mi, kiu estas la
Eternulo, anstataŭ ĉiuj unuenaskitoj el la Izraelidoj,
kaj la brutojn de la Levidoj anstataŭ ĉiuj unuenaskitoj
el la brutoj de la Izraelidoj. 42 Kaj Moseo prikalkulis,
kiel ordonis al li la Eternulo, ĉiujn unuenaskitojn el la
Izraelidoj. 43 Kaj estis ĉiuj unuenaskitaj virseksuloj
laŭ la nombro de la nomoj en la aĝo de unu monato
kaj pli laŭ la kalkulo dudek du mil ducent sepdek
tri. 44 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante:
45 Prenu la Levidojn anstataŭ ĉiuj unuenaskitoj el
la Izraelidoj, kaj la brutojn de la Levidoj anstataŭ
iliaj brutoj, kaj la Levidoj apartenu al Mi: Mi estas
la Eternulo. 46 Kaj elaĉete pro la ducent sepdek tri,

kiuj estas superfluaj kompare kun la nombro de la
Levidoj el la unuenaskitoj el la Izraelidoj, 47 prenu po
kvin sikloj pro ĉiu kapo, laŭ la sankta siklo prenu,
po dudek geroj en siklo; 48 kaj donu la monon al
Aaron kaj al liaj filoj, elaĉete pro la superfluaj inter
ili. 49 Kaj Moseo prenis la monon de la elaĉeto de la
superfluaj kompare kun tiuj, kiuj estis elaĉetitaj per la
Levidoj. 50 De la unuenaskitoj de la Izraelidoj li prenis
la monon, mil tricent sesdek kvin siklojn laŭ la sankta
siklo. 51 Kaj Moseo donis la monon de la elaĉetitoj al
Aaron kaj al liaj filoj, laŭ la diro de la Eternulo, kiel
ordonis la Eternulo al Moseo.

4 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo kaj al Aaron,
dirante: 2 Prikalkulu la filojn de Kehat el inter la
Levidoj laŭ iliaj familioj, laŭ iliaj patrodomoj, 3 en
la aĝo de tridek jaroj kaj pli, ĝis la aĝo de kvindek
jaroj, ĉiujn kapablajn por servi, por fari laboron en
la tabernaklo de kunveno. 4 Tio estas la servado
de la Kehatidoj en la tabernaklo de kunveno, en
la plejsanktejo. 5 Aaron kaj liaj filoj eniru, kiam la
tendaro devos elmoviĝi, kaj ili deprenu la kovrantan
kurtenon kaj kovru per ĝi la keston de atesto. 6 Kaj ili
metu sur ĝin tegon el antilopaj feloj, kaj ili sternu
supre bluan tukon, kaj ili enmetu ĝiajn stangojn. 7 Kaj
sur la tablo de la panoj de propono ili sternu bluan
tukon, kaj ili metu sur ĝin la pladojn kaj la kulerojn
kaj la tasojn kaj la pokalojn de la verŝoferoj; kaj ĝia
konstanta pano estu sur ĝi. 8 Kaj ili sternu sur tio
ruĝan tukon kaj kovru ĝin per tego el antilopaj feloj,
kaj ili enmetu ĝiajn stangojn. 9 Kaj ili prenu bluan
tukon kaj kovru la kandelabron de lumigado kaj ĝiajn
lucernojn kaj ĝiajn prenilojn kaj ĝiajn cindrujojn, kaj
ĉiujn ĝiajn oleujojn, kiuj estas uzataj ĉe ĝi. 10 Kaj
ili metu ĝin kaj ĉiujn ĝiajn apartenaĵojn en tegon
el antilopaj feloj, kaj ili metu tion sur portilon. 11
Kaj sur la ora altaro ili sternu bluan tukon kaj tegu
ĝin per tego el antilopaj feloj, kaj ili enmetu ĝiajn
stangojn. 12 Kaj ili prenu ĉiujn objektojn de servado,
per kiuj oni servas en la sanktejo, kaj ili metu tion en
bluan tukon kaj tegu tion per tego el antilopaj feloj
kaj metu sur portilon. 13 Kaj ili purigu la altaron de
la cindro kaj sternu sur ĝi purpuran tukon. 14 Kaj
ili metu sur ĝin ĉiujn ĝiajn objektojn, per kiuj oni
servas sur ĝi, la karbujojn, la forkojn kaj la ŝovelilojn
kaj la kalikojn, ĉiujn objektojn de la altaro, kaj ili
sternu sur ĝi tegon el antilopaj feloj, kaj ili enmetu
ĝiajn stangojn. 15 Kiam Aaron kaj liaj filoj finos la
kovradon de la sanktejo kaj de ĉiuj objektoj de la
sanktejo ĉe la elmoviĝo de la tendaro, tiam venos la
filoj de Kehat, por porti; sed ili ne ektuŝu la sanktaĵon,
por ke ili ne mortu. Tio estas la portaĵo de la filoj
de Kehat ĉe la tabernaklo de kunveno. 16 Sub la
gardado de Eleazar, filo de la pastro Aaron, estas la
oleo por la lumigado kaj la bonodoraj incensoj kaj
la konstanta farunofero kaj la oleo de sanktigado, la
gardado de la tuta tabernaklo, kaj de ĉio, kio estas
en ĝi, de la sanktejo kaj de ĝiaj objektoj. 17 Kaj la
Eternulo ekparolis al Moseo kaj al Aaron, dirante: 18
Ne pereigu la tribon de la familioj Kehatidaj inter la
Levidoj; 19 sed tion faru al ili, por ke ili vivu kaj ne
mortu, kiam ili alproksimiĝos al la plejsanktejo: Aaron
kaj liaj filoj eniru kaj starigu ilin ĉiun ĉe lia servo kaj
ĉe lia portotaĵo; 20 sed ili ne aliru, por rigardi, kiel oni
dismetas la sanktaĵojn, por ke ili ne mortu. 21 Kaj la
Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 22 Prikalkulu
ankaŭ la filojn de Gerŝon laŭ iliaj patrodomoj, laŭ iliaj
familioj. 23 De la havantaj la aĝon de tridek jaroj kaj
pli ĝis la havantaj la aĝon de kvindek jaroj kalkulu ilin,
ĉiujn, kiuj estas kapablaj por la servado, por plenumi
laboron en la tabernaklo de kunveno. 24 Tio estas
la laboro de la familioj Gerŝonidaj, por servi kaj por
porti: 25 ili portu la tapiŝojn de la tabernaklo, kaj la
tabernaklon de kunveno, ĝian kovrilon, kaj la tegon
el la antilopaj feloj, kiu estas super ĝi supre, kaj la
kovrotukon de la pordo de la tabernaklo de kunveno,
26 kaj la kurtenojn de la korto, kaj la kovrotukon de la
pordego de la korto, kiu estas ĉirkaŭ la tabernaklo
kaj ĉirkaŭ la altaro, kaj iliajn ŝnurojn kaj ĉiujn iliajn
servajn objektojn; kaj ĉion, kion oni devas fari ĉe ili,
ili faru. 27 Laŭ la ordono de Aaron kaj de liaj filoj estu
la tuta laborado de la Gerŝonidoj, koncerne ĉian ilian
portadon kaj ĉian ilian laboradon; kaj metu sub ilian
gardadon ĉion, kion ili portas. 28 Tio estas la laboro
de la familioj de la Gerŝonidoj en la tabernaklo de
kunveno; kaj la kontrolon super ili havas Itamar, filo
de la pastro Aaron. 29 La filojn de Merari prikalkulu
laŭ iliaj familioj, laŭ ilia patrodomo. 30 De la havantaj
la aĝon de tridek jaroj kaj pli ĝis la havantaj la aĝon
de kvindek jaroj prikalkulu ilin, ĉiujn servokapablajn,
por plenumi la laborojn de la tabernaklo de kunveno.
31 Kaj jen estas la ofico de ilia portado ĉe ilia tuta
laborado en la tabernaklo de kunveno: ili portu la
tabulojn de la tabernaklo kaj ĝiajn riglilojn kaj ĝiajn

kolonojn kaj ĝiajn bazojn; 32 kaj la kolonojn de la
korto ĉirkaŭe kaj iliajn bazojn kaj la najlojn kaj la
ŝnurojn kun ĉiuj iliaj apartenaĵoj kaj kun ĉiuj iliaj
servobjektoj; kaj laŭnome prikalkulu ĉiujn objektojn,
kiujn ili ofice devas porti. 33 Tio estas la laboro de la
familioj de la Merariidoj ĉe ilia tuta laborado en la
tabernaklo de kunveno, sub la kontrolo de Itamar,
filo de la pastro Aaron. 34 Kaj Moseo kaj Aaron kaj la
estroj de la komunumo prikalkulis la Kehatidojn laŭ
iliaj familioj kaj laŭ ilia patrodomo, 35 de la havantaj
la aĝon de tridek jaroj kaj pli ĝis la havantaj la aĝon
de kvindek jaroj, ĉiujn servokapablajn por la laborado
en la tabernaklo de kunveno. 36 Kaj ilia kalkulita
nombro laŭ iliaj familioj estis du mil sepcent kvindek.
37 Tio estas la kalkulitoj de la familioj Kehatidaj, de
ĉiuj laborantoj en la tabernaklo de kunveno, kiujn
prikalkulis Moseo kaj Aaron laŭ la diro de la Eternulo
per Moseo. 38 Kaj la kalkulitoj de la filoj de Gerŝon laŭ
iliaj familioj kaj laŭ ilia patrodomo, 39 de la havantaj
la aĝon de tridek jaroj kaj pli ĝis la havantaj la aĝon
de kvindek jaroj, ĉiuj servokapablaj por la laborado
en la tabernaklo de kunveno, 40 ilia nombro laŭ
iliaj familioj, laŭ ilia patrodomo, estis du mil sescent
tridek. 41 Tio estas la kalkulitoj de la familioj de la
filoj de Gerŝon, de ĉiuj laborantoj en la tabernaklo
de kunveno, kiujn prikalkulis Moseo kaj Aaron laŭ
la ordono de la Eternulo. 42 Kaj la kalkulitoj de la
familioj de la filoj de Merari laŭ iliaj familioj, laŭ
ilia patrodomo, 43 de la havantaj la aĝon de tridek
jaroj kaj pli ĝis la havantaj la aĝon de kvindek jaroj,
ĉiuj servokapablaj por la laborado en la tabernaklo
de kunveno, 44 ilia nombro laŭ iliaj familioj estis tri
mil ducent. 45 Tio estas la kalkulitoj de la familioj
de la filoj de Merari, kiujn prikalkulis Moseo kaj
Aaron laŭ la diro de la Eternulo per Moseo. 46 Ĉiuj
kalkulitoj, kiujn prikalkulis Moseo kaj Aaron kaj la
estroj de Izrael, la Levidoj laŭ iliaj familioj kaj laŭ
ilia patrodomo, 47 de la havantaj la aĝon de tridek
jaroj kaj pli ĝis la havantaj la aĝon de kvindek jaroj,
ĉiuj servokapablaj por plenumi laboron kaj plenumi
porton en la tabernaklo de kunveno, 48 ilia nombro
estis ok mil kvincent okdek. 49 Laŭ la diro de la
Eternulo per Moseo ili estis kalkulitaj, ĉiu laŭ sia
laboro kaj portado, kalkulitaj, kiel la Eternulo ordonis
al Moseo.

5 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2
Ordonu al la Izraelidoj, ke ili elsendu el la tendaro
ĉiujn leprulojn, kaj ĉiujn, kiuj havas elfluon, kaj ĉiujn,
kiuj malpuriĝis de mortinto. 3 Kiel virojn, tiel ankaŭ
virinojn elsendu, ekster la tendaron elsendu ilin, por
ke ili ne malpurigu siajn tendarojn, inter kiuj Mi
loĝas. 4 Kaj la Izraelidoj faris tiel, kaj ili elsendis ilin
ekster la tendaron; kiel diris la Eternulo al Moseo,
tiel faris la Izraelidoj. 5 Kaj la Eternulo ekparolis al
Moseo, dirante: 6 Diru al la Izraelidoj: Se viro aŭ virino
faros ian pekon kontraŭ homo, farante per tio krimon
kontraŭ la Eternulo, kaj tiu animo kulpiĝos, 7 tiam ili
konfesu sian pekon, kiun ili faris, kaj ili kompensu
sian kulpon plene kaj aldonu ĝian kvinonon, kaj donu
al tiu, kontraŭ kiu ili kulpiĝis. 8 Sed se tiu homo
ne havas parencon, al kiu oni povus kompensi la
kulpon, tiam la kompenso de la kulpo apartenas al la
Eternulo, por la pastro, krom la virŝafo de pekliberigo,
per kiu li estos pekliberigita. 9 Kaj ĉiu oferdono el
ĉiuj sanktaĵoj de la Izraelidoj, kiujn ili alportas al la
pastro, apartenas al li. 10 Kaj ĉies sanktigitaĵo al li
apartenas. Se iu ion donas al la pastro, ĝi apartenu
al li. 11 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante:
12 Parolu al la Izraelidoj, kaj diru al ili: Se ies edzino
forflankiĝos kaj pekos kontraŭ li, 13 kaj iu viro kuŝos
kun ŝi sekskuniĝe, kaj tio estos kaŝita antaŭ ŝia edzo,
ĉar ŝi malpuriĝis kaŝe, kaj ne estos atestanto pri
ŝi kaj ŝi ne estos kaptita; 14 sed atakos lin spirito
de ĵaluzo kaj li ĵaluzos sian edzinon, kiam ŝi estos
malpuriĝinta, aŭ atakos lin spirito de ĵaluzo kaj li
ĵaluzos sian edzinon, kiam ŝi ne estos malpuriĝinta: 15
tiam la edzo alkonduku sian edzinon al la pastro, kaj
alportu pro ŝi kiel oferon dekonon de efo da hordea
faruno; li ne verŝu sur ĝin oleon kaj ne metu sur ĝin
olibanon, ĉar tio estas farunofero de ĵaluzo, farunofero
de memorigo, memorigante pri malbonago. 16 Kaj
la pastro alproksimigos ŝin kaj starigos ŝin antaŭ la
Eternulo; 17 kaj la pastro prenos sanktan akvon en
argila vazo, kaj iom da tero, kiu estos sur la planko de
la tabernaklo, la pastro prenos kaj ĵetos en la akvon.
18 Kaj la pastro starigos la virinon antaŭ la Eternulo
kaj disliberigos la harojn sur la kapo de la virino kaj
donos en ŝiajn manojn la farunoferon de la memorigo,
tiun farunoferon de ĵaluzo, kaj en la mano de la pastro
estos akvo maldolĉa, malbeniga. 19 Kaj la pastro ŝin
ĵurligos, kaj diros al la virino: Se neniu viro kuŝis kun
vi kaj se vi ne forflankiĝis per malpuriĝo kun alia

viro anstataŭ via edzo, tiam restu sendifekta de ĉi tiu
maldolĉa malbeniga akvo; 20 sed se vi forflankiĝis
kun alia viro anstataŭ via edzo kaj se vi malpuriĝis
kaj iu viro kuŝis kun vi krom via edzo — 21 la pastro
ĵurligos la virinon per ĵuro de malbeno, kaj la pastro
diros al la virino: Tiam la Eternulo fordonu vin al
malbeno kaj al ĵuro inter via popolo, farante vian
femuron maldikiĝinta kaj vian ventron ŝvelinta; 22 kaj
ĉi tiu malbeniga akvo eniru en viajn internaĵojn, por
ke ŝvelu via ventro kaj maldikiĝu via femuro. Kaj la
virino diros: Amen, amen! 23 Kaj la pastro enskribos
tiun ĵurligon en libro kaj lavos ĝin per la maldolĉa
akvo. 24 Kaj li trinkigos al la virino la maldolĉan
malbenigan akvon, kaj eniros en ŝin la malbeniga
akvo por maldolĉo. 25 Kaj la pastro prenos el la mano
de la virino la farunoferon de ĵaluzo, kaj li skuos
la farunoferon antaŭ la Eternulo kaj portos ĝin al
la altaro. 26 Kaj la pastro prenos plenmanon el la
farunofero, ĝian parton de memorigo, kaj bruligos sur
la altaro, kaj poste li trinkigos al la virino la akvon. 27
Kaj kiam li estos trinkiginta al ŝi la akvon, tiam, se ŝi
malpuriĝis kaj pekis kontraŭ sia edzo, eniros en ŝin la
malbeniga akvo por maldolĉo, kaj ŝvelos ŝia ventro kaj
maldikiĝos ŝia femuro; kaj la virino fariĝos malbeno
inter sia popolo. 28 Sed se la virino ne malpuriĝis
kaj ŝi estas pura, tiam ŝi restos sendifekta kaj povos
naski infanojn. 29 Tio estas la leĝo pri la ĵaluzo, kiam
virino forflankiĝos kun alia viro anstataŭ sia edzo
kaj malpuriĝos, 30 aŭ kiam viron atakos spirito de
ĵaluzo kaj li ĵaluzos sian edzinon; tiam li starigu la
edzinon antaŭ la Eternulo, kaj la pastro agu kun ŝi laŭ
la tuta tiu leĝo. 31 Kaj la edzo estos pura de kulpo, kaj
la edzino portos sian pekon.

6 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2 Parolu
al la Izraelidoj, kaj diru al ili: Se viro aŭ virino
decidos fari sanktan promeson de konsekriĝo, por
konsekri sin al la Eternulo, 3 tiam li devas deteni
sin de vino kaj de ebriigaĵo, vinagron vinan kaj
vinagron de ebriigaĵoj li ne devas trinki, kaj nenian
trinkaĵon el vinberoj li devas trinki, kaj vinberojn
freŝajn aŭ sekigitajn li ne devas manĝi. 4 Dum la tuta
tempo de sia konsekriteco li devas manĝi nenion,
kio estas farita el vinberoj, de la kernoj ĝis la ŝelo.
5 Dum la tuta tempo de la promesita konsekriteco
razilo ne devas ektuŝi lian kapon; ĝis la finiĝo de la
tempo, por kiu li konsekris sin al la Eternulo, li estas
sankta; li lasu libere kreski la harojn de sia kapo.
6 Dum la tuta tempo, por kiu li konsekris sin al la
Eternulo, li ne aliru al mortinta korpo. 7 Ne ĉe sia
patro, nek ĉe sia patrino, nek ĉe sia frato, nek ĉe sia
fratino li malpuriĝu, se ili mortis; ĉar konsekro al lia
Dio estas sur lia kapo. 8 Dum la tuta tempo de sia
konsekriteco li estas sankta al la Eternulo. 9 Kaj se iu
mortos apud li subite, neatendite, kaj li malpurigos
sian konsekritan kapon, li pritondu sian kapon en la
tago de sia puriĝo, en la sepa tago li ĝin pritondu;
10 kaj en la oka tago li alportu du turtojn aŭ du
kolombidojn al la pastro, al la pordo de la tabernaklo
de kunveno. 11 Kaj la pastro faros el unu pekoferon
kaj el la dua bruloferon, kaj li pekliberigos lin de tio,
kion li pekis per la mortinta korpo, kaj li sanktigos
lian kapon en tiu tago. 12 Kaj li konsekros sin al
la Eternulo por la tempo de sia konsekriteco, kaj li
alportos jaraĝan ŝafidon kiel kulpoferon; kaj la tempo
antaŭa perdos sian valoron, ĉar lia konsekriteco
malpuriĝis. 13 Kaj jen estas la leĝo pri la konsekrito:
kiam finiĝos la tempo de lia konsekriteco, oni venigu
lin al la pordo de la tabernaklo de kunveno; 14 kaj
li alportu kiel oferon al la Eternulo unu jaraĝan
ŝafidon sendifektan kiel bruloferon, kaj unu jaraĝan
ŝafidinon sendifektan kiel pekoferon, kaj unu virŝafon
sendifektan kiel pacoferon, 15 kaj korbon da macoj
el delikata faruno, kukojn miksitajn kun oleo, kaj
flanojn nefermentintajn, ŝmiritajn per oleo, kaj ilian
farunoferon kaj verŝoferon. 16 Kaj la pastro prezentos
tion antaŭ la Eternulon kaj faros lian pekoferon kaj
lian bruloferon. 17 Kaj el la virŝafo li faros pacoferon al
la Eternulo kune kun la korbo da macoj, kaj la pastro
faros lian farunoferon kaj lian verŝoferon. 18 Kaj la
konsekrito pritondos ĉe la pordo de la tabernaklo
de kunveno sian konsekritan kapon, kaj li prenos la
harojn de sia konsekrita kapo, kaj metos sur la fajron,
kiu estas sub la pacofero. 19 Kaj la pastro prenos la
kuiritan ŝultron de la virŝafo kaj unu nefermentintan
kukon el la korbo kaj unu nefermentintan flanon, kaj
li metos tion sur la manon de la konsekrito, kiam tiu
estos pritondinta sian konsekritan kapon. 20 Kaj la
pastro skuos tion kiel skuoferon antaŭ la Eternulo;
sanktigita ĝi estu por la pastro, krom la brustaĵo de
skuado kaj la femuro de levado. Poste la konsekrito
povas trinki vinon. 21 Tio estas la leĝo pri konsekrito,
kiu donis sanktan promeson; lia ofero apartenas al la
Eternulo pro lia konsekriteco, krom tio, kion permesos

al li lia bonhavo; konforme al sia promeso, kiun li
promesis, li faru, laŭ la leĝo pri lia konsekriteco. **22**
Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: **23** Diru
al Aaron kaj al liaj filoj jene: Tiamaniere benu la
Izraelidojn; diru al ili: **24** La Eternulo vin benu kaj vin
gardu; **25** La Eternulo lumu al vi per Sia vizaĝo kaj
favorkoru vin; **26** La Eternulo turnu Sian vizaĝon al vi
kaj donu al vi pacon. **27** Tiel ili metu Mian nomon sur
la Izraelidojn, kaj Mi ilin benos.

**7** En la tago, kiam Moseo finis la starigadon de la
tabernaklo, kiam li sanktoleis ĝin kaj sanktigis ĝin
kaj ĉiujn ĝiajn apartenaĵojn kaj la altaron kaj ĉiujn
ĝiajn apartenaĵojn kaj sanktoleis ilin kaj sanktigis
ilin, **2** tiam alportis la estroj de Izrael, la ĉefoj de
siaj patrodomoj, tiuj estroj de la triboj, tiuj, kiuj
administris la kalkuladon — **3** ili alportis siajn oferojn
antaŭ la Eternulon, ses kovritajn veturilojn kaj dek du
bovojn, po unu veturilo de du estroj kaj po unu bovo
de ĉiu, kaj ili venigis tion antaŭ la tabernaklon. **4** Kaj
la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: **5** Prenu de
ili, kaj tio estu por la plenumado de la laboroj ĉe la
tabernaklo de kunveno; kaj donu tion al la Levidoj, al
ĉiu laŭ la speco de lia laborado. **6** Kaj Moseo prenis la
veturilojn kaj la bovojn kaj donis ilin al la Levidoj. **7** Du
veturilojn kaj kvar bovojn li donis al la filoj de Gerŝon
laŭ la speco de ilia laborado; **8** kaj kvar veturilojn kaj
ok bovojn li donis al la filoj de Merari laŭ la speco
de ilia laborado, sub la kontrolo de Itamar, filo de la
pastro Aaron. **9** Sed al la filoj de Kehat li ne donis,
ĉar ili havis laboradon sanktan; sur la ŝultroj ili devis
porti. **10** Kaj la estroj alportis oferojn por inaŭgura
dono de la altaro, en la tago, en kiu ĝi estis sanktoleita;
kaj la estroj alportis sian oferon antaŭ la altaron. **11**
Kaj la Eternulo diris al Moseo: Po unu estro en tago ili
alportu sian oferon por la inaŭguro de la altaro. **12** En
la unua tago la alportanto de sia ofero estis Naĥŝon,
filo de Aminadab, de la tribo de Jehuda. **13** Kaj lia
ofero estis: unu arĝenta plado, havanta la pezon de
cent tridek sikloj, unu arĝenta kaliko de sepdek sikloj,
laŭ la sankta siklo, ambaŭ plenaj de delikata faruno,
miksita kun oleo, por farunofero; **14** unu ora kulero
deksikla, plena de incenso; **15** unu bovido, unu virŝafo,
unu jaraĝa ŝafido por brulofero; **16** unu kapro por
pekofero; **17** kaj por pacofero du bovoj, kvin virŝafoj,
kvin virkaproj, kvin jaraĝaj ŝafidoj. Tio estis la ofero
de Naĥŝon, filo de Aminadab. **18** En la dua tago alportis
Natanel, filo de Cuar, estro de Isaĥar. **19** Li alportis sian
oferon, kiu estis: unu arĝenta plado, havanta la pezon
de cent tridek sikloj, unu arĝenta kaliko de sepdek
sikloj, laŭ la sankta siklo, ambaŭ plenaj de delikata
faruno, miksita kun oleo, por farunofero; **20** unu ora
kulero deksikla, plena de incenso; **21** unu bovido,
unu virŝafo, unu jaraĝa ŝafido por brulofero; **22** unu
kapro por pekofero; **23** kaj por pacofero du bovoj,
kvin virŝafoj, kvin virkaproj, kvin jaraĝaj ŝafidoj. Tio
estis la ofero de Netanel, filo de Cuar. **24** En la tria
tago — la estro de la Zebulunidoj, Eliab, filo de Ĥelon.
**25** Lia ofero: unu arĝenta plado, havanta la pezon
de cent tridek sikloj, unu arĝenta kaliko de sepdek
sikloj, laŭ la sankta siklo, ambaŭ plenaj de delikata
faruno, miksita kun oleo, por farunofero; **26** unu ora
kulero deksikla, plena de incenso; **27** unu bovido,
unu virŝafo, unu jaraĝa ŝafido por brulofero; **28** unu
kapro por pekofero; **29** kaj por pacofero du bovoj,
kvin virŝafoj, kvin virkaproj, kvin jaraĝaj ŝafidoj. Tio
estis la ofero de Eliab, filo de Ĥelon. **30** En la kvara
tago — la estro de la Rubenidoj, Elicur, filo de Ŝedeur.
**31** Lia ofero: unu arĝenta plado, havanta la pezon de
cent tridek sikloj, unu arĝenta kaliko de sepdek sikloj,
laŭ la sankta siklo, ambaŭ plenaj de delikata faruno,
miksita kun oleo, por farunofero; **32** unu ora kulero
deksikla, plena de incenso; **33** unu bovido, unu virŝafo,
unu jaraĝa ŝafido por brulofero; **34** unu kapro por
pekofero; **35** kaj por pacofero du bovoj, kvin virŝafoj,
kvin virkaproj, kvin jaraĝaj ŝafidoj. Tio estis la ofero
de Elicur, filo de Ŝedeur. **36** En la kvina tago — la
estro de la Simeonidoj, Ŝelumiel, filo de Curiŝadaj.
**37** Lia ofero: unu arĝenta plado, havanta la pezon
de cent tridek sikloj, unu arĝenta kaliko de sepdek
sikloj, laŭ la sankta siklo, ambaŭ plenaj de delikata
faruno, miksita kun oleo, por farunofero; **38** unu ora
kulero deksikla, plena de incenso; **39** unu bovido,
unu virŝafo, unu jaraĝa ŝafido por brulofero; **40** unu
kapro por pekofero; **41** kaj por pacofero du bovoj, kvin
virŝafoj, kvin virkaproj, kvin jaraĝaj ŝafidoj. Tio estis
la ofero de Ŝelumiel, filo de Curiŝadaj. **42** En la sesa
tago — la estro de la Gadidoj, Eljasaf, filo de Deuel.
**43** Lia ofero: unu arĝenta plado, havanta la pezon
de cent tridek sikloj, unu arĝenta kaliko de sepdek
sikloj, laŭ la sankta siklo, ambaŭ plenaj de delikata
faruno, miksita kun oleo, por farunofero; **44** unu ora
kulero deksikla, plena de incenso; **45** unu bovido,
unu virŝafo, unu jaraĝa ŝafido por brulofero; **46** unu
kapro por pekofero; **47** kaj por pacofero du bovoj, kvin

virŝafoj, kvin virkaproj, kvin jaraĝaj ŝafidoj. Tio estis
la ofero de Eljasaf, filo de Deuel. **48** En la sepa tago
— la estro de la Efraimidoj, Eliŝama, filo de Amihud.
**49** Lia ofero: unu arĝenta plado, havanta la pezon de
cent tridek sikloj, unu arĝenta kaliko de sepdek sikloj,
laŭ la sankta siklo, ambaŭ plenaj de delikata faruno,
miksita kun oleo, por farunofero; **50** unu ora kulero
deksikla, plena de incenso; **51** unu bovido, unu virŝafo,
unu jaraĝa ŝafido por brulofero; **52** unu kapro por
pekofero; **53** kaj por pacofero du bovoj, kvin virŝafoj,
kvin virkaproj, kvin jaraĝaj ŝafidoj. Tio estis la ofero
de Eliŝama, filo de Amihud. **54** En la oka tago — la
estro de la Manaseidoj, Gamliel, filo de Pedacur. **55**
Lia ofero: unu arĝenta plado, havanta la pezon de
cent tridek sikloj, unu arĝenta kaliko de sepdek sikloj,
laŭ la sankta siklo, ambaŭ plenaj de delikata faruno,
miksita kun oleo, por farunofero; **56** unu ora kulero
deksikla, plena de incenso; **57** unu bovido, unu virŝafo,
unu jaraĝa ŝafido por brulofero; **58** unu kapro por
pekofero; **59** kaj por pacofero du bovoj, kvin virŝafoj,
kvin virkaproj, kvin jaraĝaj ŝafidoj. Tio estis la ofero
de Gamliel, filo de Pedacur. **60** En la naŭa tago — la
estro de la Benjamenidoj, Abidan, filo de Gideoni. **61**
Lia ofero: unu arĝenta plado, havanta la pezon de
cent tridek sikloj, unu arĝenta kaliko de sepdek sikloj,
laŭ la sankta siklo, ambaŭ plenaj de delikata faruno,
miksita kun oleo, por farunofero; **62** unu ora kulero
deksikla, plena de incenso; **63** unu bovido, unu virŝafo,
unu jaraĝa ŝafido por brulofero; **64** unu kapro por
pekofero; **65** kaj por pacofero du bovoj, kvin virŝafoj,
kvin virkaproj, kvin jaraĝaj ŝafidoj. Tio estis la ofero
de Abidan, filo de Gideoni. **66** En la deka tago — la
estro de la Danidoj, Aĥiezer, filo de Amiŝadaj. **67** Lia
ofero: unu arĝenta plado, havanta la pezon de cent
tridek sikloj, unu arĝenta kaliko de sepdek sikloj,
laŭ la sankta siklo, ambaŭ plenaj de delikata faruno,
miksita kun oleo, por farunofero; **68** unu ora kulero
deksikla, plena de incenso; **69** unu bovido, unu virŝafo,
unu jaraĝa ŝafido por brulofero; **70** unu kapro por
pekofero; **71** kaj por pacofero du bovoj, kvin virŝafoj,
kvin virkaproj, kvin jaraĝaj ŝafidoj. Tio estis la ofero
de Aĥiezer, filo de Amiŝadaj. **72** En la dek-unua tago
— la estro de la Aŝeridoj, Pagiel, filo de Oĥran. **73**
Lia ofero: unu arĝenta plado, havanta la pezon de
cent tridek sikloj, unu arĝenta kaliko de sepdek sikloj,
laŭ la sankta siklo, ambaŭ plenaj de delikata faruno,
miksita kun oleo, por farunofero; **74** unu ora kulero
deksikla, plena de incenso; **75** unu bovido, unu virŝafo,
unu jaraĝa ŝafido por brulofero; **76** unu kapro por
pekofero; **77** kaj por pacofero du bovoj, kvin virŝafoj,
kvin virkaproj, kvin jaraĝaj ŝafidoj. Tio estis la ofero
de Pagiel, filo de Oĥran. **78** En la dek-dua tago —
la estro de la Naftaliidoj, Aĥira, filo de Enan. **79** Lia
ofero: unu arĝenta plado, havanta la pezon de cent
tridek sikloj, unu arĝenta kaliko de sepdek sikloj,
laŭ la sankta siklo, ambaŭ plenaj de delikata faruno,
miksita kun oleo, por farunofero; **80** unu ora kulero
deksikla, plena de incenso; **81** unu bovido, unu virŝafo,
unu jaraĝa ŝafido por brulofero; **82** unu kapro por
pekofero; **83** kaj por pacofero du bovoj, kvin virŝafoj,
kvin virkaproj, kvin jaraĝaj ŝafidoj. Tio estis la ofero
de Aĥira, filo de Enan. **84** Tia estis la inaŭgura dono
de la altaro, en la tago, en kiu ĝi estis sanktoleita,
de la estroj de Izrael: dek du arĝentaj pladoj, dek
du arĝentaj kalikoj, dek du oraj kuleroj; **85** po cent
tridek sikloj da arĝento havis ĉiu plado, kaj po sepdek
ĉiu kaliko; la tuta arĝento de tiuj vazoj estis du mil
kvarcent sikloj laŭ la sankta siklo. **86** Da oraj kuleroj
plenaj de incenso estis dek du; po dek sikloj havis ĉiu
kulero, laŭ la sankta siklo; la tuta oro de la kuleroj
estis cent dudek sikloj. **87** Ĉiuj brutoj por brulofero
estis: dek du bovidoj, dek du virŝafoj, dek du jaraĝaj
ŝafidoj, kaj al ili farunoferoj; kaj dek du kaproj por
pekofero. **88** Kaj ĉiuj brutoj por pacofero estis: dudek
kvar bovoj, sesdek virŝafoj, sesdek virkaproj, sesdek
jaraĝaj ŝafidoj. Tio estis la inaŭgura dono de la altaro,
post kiam ĝi estis sanktoleita. **89** Kaj kiam Moseo
eniris en la tabernaklon de kunveno, por paroli kun
Li, li aŭdis la Voĉon, parolantan al li de super la
fermoplato, kiu estas sur la kesto de atesto, inter la
du keruboj; kaj estis parolate al li.

**8** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: **2**
Parolu al Aaron, kaj diru al li: Kiam vi ekbruligos
la lucernojn, tiam sur la antaŭan flankon de la
kandelabro lumu la sep lucernoj. **3** Kaj Aaron tiel faris;
sur la antaŭan flankon de la kandelabro li lumigis
la lucernojn, kiel la Eternulo ordonis al Moseo. **4**
Kaj jen estas la aranĝo de la kandelabro: forĝita el
oro, de ĝia trunko ĝis ĝiaj floroj, forĝita ĝi estis; laŭ
la modelo, kiun montris la Eternulo al Moseo, tiel
li faris la kandelabron. **5** Kaj la Eternulo ekparolis
al Moseo, dirante: **6** Prenu la Levidojn el inter la
Izraelidoj kaj purigu ilin. **7** Kaj tiel agu kun ili, por

purigi ilin: aspergu ilin per akvo propeka, kaj ili
prirazu sian tutan korpon kaj lavu siajn vestojn
kaj purigu sin. 8 Kaj ili prenu bovidon kaj al ĝi
farunoferon, delikatan farunon, miksitan kun oleo,
kaj duan bovidon prenu por pekofero. 9 Kaj venigu
la Levidojn antaŭ la tabernaklon de kunveno, kaj
kunvenigu la tutan komunumon de la Izraelidoj. 10
Kaj alvenigu la Levidojn antaŭ la Eternulon, kaj la
Izraelidoj metu siajn manojn sur la Levidojn. 11 Kaj
Aaron faru super la Levidoj skuon antaŭ la Eternulo
en la nomo de la Izraelidoj, por ke ili komencu fari
la servon al la Eternulo. 12 Kaj la Levidoj metu siajn
manojn sur la kapojn de la bovidoj, kaj faru el unu
pekoferon kaj el la dua bruloferon al la Eternulo,
por pekliberigi la Levidojn. 13 Kaj starigu la Levidojn
antaŭ Aaron kaj antaŭ liaj filoj, kaj faru super ili skuon
antaŭ la Eternulo. 14 Kaj tiel apartigu la Levidojn el
inter la Izraelidoj, kaj la Levidoj apartenu al Mi. 15 Kaj
post tio la Levidoj eniros, por servi en la tabernaklo de
kunveno, kiam vi estos puriginta ilin kaj plenuminta
super ili la skuon. 16 Ĉar ili estas fordonitaj al Mi
el inter la Izraelidoj; anstataŭ ĉiuj utermalfermintoj
unuenaskitoj el ĉiuj Izraelidoj Mi prenis ilin por
Mi. 17 Ĉar al Mi apartenas ĉiuj unuenaskitoj de la
Izraelidoj, el la homoj kaj el la brutoj; en la tago, en
kiu Mi batis ĉiujn unuenaskitojn en la lando Egipta,
Mi sanktigis ilin por Mi. 18 Kaj Mi prenis la Levidojn
anstataŭ ĉiuj unuenaskitoj inter la Izraelidoj. 19 Kaj
Mi fordonis la Levidojn al Aaron kaj al liaj filoj el inter
la Izraelidoj, por ke ili faru servon pro la Izraelidoj
en la tabernaklo de kunveno kaj por pekliberigi la
Izraelidojn; por ke ne trafu la Izraelidojn frapo, se la
Izraelidoj alproksimiĝus al la sanktejo. 20 Kaj Moseo
kaj Aaron kaj la tuta komunumo de la Izraelidoj
agis kun la Levidoj konforme al ĉio, kion la Eternulo
ordonis al Moseo pri la Levidoj; tiel agis kun ili
la Izraelidoj. 21 Kaj la Levidoj sin purigis kaj lavis
siajn vestojn, kaj Aaron faris super ili skuon antaŭ la
Eternulo, kaj Aaron pekliberigis ilin, por purigi ilin. 22
Kaj post tio la Levidoj eniris, por plenumi sian servon
en la tabernaklo de kunveno antaŭ Aaron kaj antaŭ liaj
filoj; kiel la Eternulo ordonis al Moseo pri la Levidoj,
tiel oni agis kun ili. 23 Kaj la Eternulo ekparolis al
Moseo, dirante: 24 Jen estas, kio koncernas la Levidojn:
de la aĝo de dudek kvin jaroj kaj pli ili devas eniri
en sian oficon pri la servado en la tabernaklo de
kunveno. 25 Kaj de la aĝo de kvindek jaroj ili retiriĝos
el la ofico de la servado kaj ne servos plu. 26 Tiam
ili servos siajn fratojn en la tabernaklo de kunveno,
plenumante gardadon, sed ne farante servadon. Tiel
agu kun la Levidoj koncerne ilian oficon.

9 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo en la dezerto
Sinaj en la dua jaro post ilia eliro el la lando Egipta,
en la unua monato, dirante: 2 La Izraelidoj faru la
Paskon en la difinita tempo. 3 En la dek-kvara tago
de ĉi tiu monato, ĉirkaŭ la vespero, faru ĝin en ĝia
tempo; laŭ ĉiuj ĝiaj leĝoj kaj laŭ ĉiuj ĝiaj instrukcioj
faru ĝin. 4 Kaj Moseo diris al la Izraelidoj, ke ili
faru la Paskon. 5 Kaj ili faris la Paskon en la unua
monato, en la dek-kvara tago de la monato, ĉirkaŭ la
vespero, en la dezerto Sinaj; konforme al ĉio, kion la
Eternulo ordonis al Moseo, tiel faris la Izraelidoj. 6
Sed estis homoj, kiuj estis malpuraj pro ektuŝo de
mortinta homo kaj ne povis fari la Paskon en tiu
tago; ili venis antaŭ Moseon kaj Aaronon en tiu tago;
7 kaj tiuj homoj diris al li: Ni estas malpuraj pro
ektuŝo de mortinta homo; kial ni estu esceptataj, ke
ni ne alportu la oferon al la Eternulo en ĝia tempo
inter la Izraelidoj? 8 Kaj Moseo diris al ili: Staru; mi
aŭskultos, kion la Eternulo ordonos koncerne vin. 9
Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 10 Parolu
al la Izraelidoj, dirante: Se iu el vi aŭ el viaj estontaj
generacioj estos malpura pro ektuŝo de mortinta
homo, aŭ se iu estos en malproksima vojiro, tamen li
faru Paskon al la Eternulo. 11 En la dua monato, en
la dek-kvara tago, ĉirkaŭ la vespero ili faru ĝin; kun
macoj kaj maldolĉaj herboj ili ĝin manĝu. 12 Ili ne
lasu iom el ĝi ĝis la mateno, kaj oston ili ne rompu
en ĝi; laŭ ĉiuj ritoj de la Pasko ili faru ĝin. 13 Sed se
iu estas pura kaj ne troviĝas en vojiro kaj tamen ne
faras la Paskon, ties animo ekstermiĝos el inter sia
popolo, ĉar oferon al la Eternulo li ne alportis en ĝia
tempo; sian pekon portos tiu homo. 14 Kaj se loĝos ĉe
vi fremdulo, li ankaŭ faru Paskon al la Eternulo; laŭ
la rito de la Pasko kaj laŭ ĝia regularo li faru: sama
regularo estu por vi, kiel por la fremdulo, tiel por
la indiĝeno. 15 En la tago, en kiu estis starigita la
tabernaklo, nubo kovris la tabernaklon super la tendo
de atesto, kaj vespere estis super la tabernaklo kvazaŭ
aspekto de fajro ĝis la mateno. 16 Tiel estis ĉiam: nubo
ĝin kovris, kaj fajra aspekto en la nokto. 17 Kaj kiam
leviĝadis la nubo de super la tabernaklo, tuj poste
elmoviĝadis la Izraelidoj; kaj sur la loko, kie haltadis

la nubo, tie starigadis sian tendaron la Izraelidoj. 18
Laŭ la ordono de la Eternulo la Izraelidoj elmoviĝadis,
kaj laŭ la ordono de la Eternulo ili starigadis sian
tendaron; dum la tuta tempo, kiam la nubo restis
super la tabernaklo, ili staradis tendare. 19 Kaj se la
nubo restadis super la tabernaklo longan tempon, la
Izraelidoj plenumadis la instrukcion de la Eternulo
kaj ne elmoviĝadis. 20 Iufoje la nubo restadis kelke
da tagoj super la tabernaklo, sed ili laŭ la ordono
de la Eternulo restadis tendare kaj laŭ la ordono de
la Eternulo elmoviĝadis. 21 Iufoje la nubo restadis
de vespero ĝis mateno; tiam, kiam la nubo leviĝis
matene, ili elmoviĝadis; iufoje tagon kaj nokton —
kiam la nubo leviĝis, ili elmoviĝadis. 22 Iufoje du
tagojn aŭ monaton aŭ pli longan tempon — kiel
longe la nubo super la tabernaklo restis super ĝi, la
Izraelidoj restadis tendare kaj ne elmoviĝadis; sed
kiam ĝi leviĝis, ili elmoviĝadis. 23 Laŭ la ordono de la
Eternulo ili restadis tendare, kaj laŭ la ordono de la
Eternulo ili elmoviĝadis; ili plenumadis la instrukcion
de la Eternulo, konforme al tio, kiel la Eternulo
ordonis per Moseo.

10 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2
Faru al vi du arĝentajn trumpetojn, forĝitaj
faru ilin; kaj ili servu al vi por kunvokado de la
komunumo kaj por elmoviĝado de la tendaroj. 3 Kiam
oni simple trumpetos per ili, tiam kolektiĝu al vi
la tuta komunumo antaŭ la pordo de la tabernaklo
de kunveno. 4 Kaj se oni trumpetos per unu el
ili, tiam kolektiĝu al vi la princoj, la milestroj de
Izrael. 5 Kaj kiam vi trumpetos tambursone, tiam
elmoviĝu la tendaroj, kiuj staras oriente. 6 Kaj
kiam vi trumpetos tambursone duan fojon, tiam
elmoviĝu la tendaroj, kiuj staras sude; oni trumpetu
tambursone, kiam ili devos elmoviĝi. 7 Sed kiam
oni devas kunvenigi la komunumon, tiam trumpetu
simple, sed ne tambursone. 8 Kaj la filoj de Aaron, la
pastroj, trumpetu per la trumpetoj; tio estu por vi
leĝo eterna en viaj generacioj. 9 Kaj kiam vi komencos
militon en via lando kontraŭ malamiko, kiu premas
vin, tiam trumpetu tambursone per trumpetoj; kaj
tiam vi estos rememoritaj antaŭ la Eternulo, via
Dio, kaj vi estos helpitaj kontraŭ viaj malamikoj. 10
Kaj en la tago de via ĝojo kaj en viaj festoj kaj en
viaj novmonataj tagoj trumpetu per trumpetoj ĉe
viaj bruloferoj kaj ĉe viaj pacoferoj; kaj tio estos
memorigo pri vi antaŭ via Dio: Mi estas la Eternulo,
via Dio. 11 En la dua jaro, en la dua monato, en la
dudeka tago de la monato, leviĝis la nubo de super la
tabernaklo de atesto. 12 Kaj elmoviĝis la Izraelidoj en
sian vojiron el la dezerto Sinaj, kaj la nubo haltis en
la dezerto Paran. 13 Kaj ili elmoviĝis la unuan fojon
konforme al la ordono de la Eternulo per Moseo.
14 Kaj unue elmoviĝis la standardo de la tendaro
de la Jehudaidoj laŭ iliaj taĉmentoj, kaj super ĝia
taĉmento estis Naĥŝon, filo de Aminadab. 15 Kaj super
la taĉmento de la tribo de la Isaĥaridoj estis Netanel,
filo de Cuar. 16 Kaj super la taĉmento de la tribo
de la Zebulunidoj estis Eliab, filo de Ĥelon. 17 Kaj
oni dismetis la tabernaklon, kaj elmoviĝis la filoj de
Gerŝon kaj la filoj de Merari, portantaj la tabernaklon.
18 Kaj elmoviĝis la standardo de la tendaro de Ruben
laŭ iliaj taĉmentoj, kaj super ĝia taĉmento estis Elicur,
filo de Ŝedeur. 19 Kaj super la taĉmento de la tribo
de la Simeonidoj estis Ŝelumiel, filo de Curiŝadaj. 20
Kaj super la taĉmento de la tribo de la Gadidoj estis
Eljasaf, filo de Deuel. 21 Kaj elmoviĝis la Kehatidoj,
portantaj la sanktaĵojn; sed oni starigis la tabernaklon
antaŭ ilia alveno. 22 Kaj elmoviĝis la standardo de la
tendaro de la Efraimidoj laŭ iliaj taĉmentoj, kaj super
ĝia taĉmento estis Eliŝama, filo de Amihud. 23 Kaj
super la taĉmento de la tribo de la Manaseidoj estis
Gamliel, filo de Pedacur. 24 Kaj super la taĉmento de la
tribo de la Benjamenidoj estis Abidan, filo de Gideoni.
25 Kaj elmoviĝis la standardo de la tendaro de la
Danidoj, la finulo de ĉiuj tendaroj, laŭ iliaj taĉmentoj,
kaj super ĝia taĉmento estis Aĥiezer, filo de Amiŝadaj.
26 Kaj super la taĉmento de la tribo de la Aŝeridoj
estis Pagiel, filo de Oĥran. 27 Kaj super la taĉmento de
la tribo de la Naftaliidoj estis Aĥira, filo de Enan. 28
Tiaj estis la marŝoj de la Izraelidoj laŭ iliaj taĉmentoj.
Kaj ili elmoviĝis. 29 Kaj Moseo diris al Ĥobab, filo de
Reuel la Midjanido, la bopatro de Moseo: Ni vojiras al
tiu loko, pri kiu la Eternulo diris: Ĝin Mi donos al vi;
iru kun ni, kaj ni faros al vi bonon, ĉar la Eternulo
promesis bonon al Izrael. 30 Sed tiu diris al li: Mi ne
iros, sed al mia lando kaj al mia parencaro mi iros.
31 Kaj li diris: Ho, ne forlasu nin; ĉar vi scias, kie ni
povas starigi tendaron en la dezerto, kaj vi estos por
ni kiel okuloj; 32 se vi iros kun ni, tiam la bonon, kiun
la Eternulo faros al ni, ni faros al vi. 33 Kaj ili ekvojiris
for de la monto de la Eternulo vojon de tri tagoj; kaj
la kesto de la interligo de la Eternulo iris antaŭ ili la

tritagan vojon, por esplori por ili lokon de ripozo. 34
Kaj la nubo de la Eternulo estis super ili dum la tago,
kiam ili iris el la tendaro. 35 Kaj ĉiufoje, kiam la kesto
elmoviĝis, Moseo diradis: Leviĝu, ho Eternulo, kaj
disĵetiĝu Viaj malamikoj, kaj forkuru Viaj malamantoj
for de Via vizaĝo. 36 Kaj kiam ĝi haltis, li diradis:
Revenu, ho Eternulo, al la multegaj miloj de Izrael.

11 Kaj la popolo komencis murmuri pri sia malfeliĉo
al la oreloj de la Eternulo; kaj kiam la Eternulo
tion aŭdis, Lia kolero ekflamis; kaj ekbrulis inter ili
fajro de la Eternulo, kaj ĝi komencis ekstermadon
en la rando de la tendaro. 2 Tiam la popolo ekkriis
al Moseo, kaj Moseo preĝis al la Eternulo, kaj la
fajro estingiĝis. 3 Kaj li donis al tiu loko la nomon
Tabera, ĉar brulis inter ili la fajro de la Eternulo. 4
Kaj la aliĝinta popolamaso inter ili komencis aperigi
kapricojn; kaj ankaŭ la Izraelidoj ekploris, kaj diris:
Kiu manĝigos al ni viandon? 5 Ni memoras la fiŝojn,
kiujn ni manĝis en Egiptujo senpage, la kukumojn kaj
la melonojn kaj la poreojn kaj la bulbojn kaj la ajlojn.
6 Kaj nun nia animo velkas; estas nenio krom ĉi tiu
manao antaŭ niaj okuloj. 7 Kaj la manao estis kiel
semo de koriandro, kaj ĝia aspekto estis kiel la aspekto
de bedelio. 8 La popolo disiradis kaj kolektadis kaj
mueladis per muelŝtonoj aŭ pistadis en pistujo, kaj
kuiradis en kaldrono kaj faradis el ĝi kukojn; kaj ĝia
gusto estis kiel la gusto de oleaj kukoj. 9 Kaj kiam la
roso faladis sur la tendaron en la nokto, tiam faladis
sur ĝin ankaŭ la manao. 10 Moseo aŭdis, ke la popolo
ploras en siaj familioj, ĉiu ĉe la pordo de sia tendo; kaj
forte ekflamis la kolero de la Eternulo, kaj Moseon tio
afliktis. 11 Kaj Moseo diris al la Eternulo: Kial Vi faris
malbonon al Via sklavo? kaj kial mi ne plaĉis al Vi, ke
Vi metis la ŝarĝon de tiu tuta popolo sur min? 12 Ĉu
mi embriigis tiun tutan popolon? aŭ ĉu mi ĝin naskis,
ke Vi diris al mi: Portu ĝin sur via brusto, kiel portas
nutristino suĉinfanon, en la landon, pri kiu Vi ĵuris al
ĝiaj patroj? 13 Kie mi prenos viandon, por doni al tiu
tuta popolo? ĉar ili ploras antaŭ mi, dirante: Donu al
ni viandon por manĝi. 14 Ne povas mi sola porti tiun
tutan popolon, ĉar ĝi estas tro peza por mi. 15 Kaj se
Vi tiel agas kun mi, tiam mortigu min, se mi plaĉas
al Vi, por ke mi ne vidu mian malfeliĉon. 16 Tiam la
Eternulo diris al Moseo: Kolektu al Mi sepdek virojn
el la plejaĝuloj de Izrael, pri kiuj vi scias, ke ili estas la
plejaĝuloj de la popolo kaj ĝiaj gvidantoj, kaj prenu
ilin al la tabernaklo de kunveno, ke ili stariĝu tie kun
vi. 17 Kaj Mi malleviĝos kaj parolos tie kun vi, kaj Mi
deprenos iom de la spirito, kiu estas sur vi, kaj Mi
metos sur ilin, por ke ili portu kun vi la ŝarĝon de la
popolo kaj por ke vi ne portu sola. 18 Kaj al la popolo
diru: Prepariĝu por morgaŭ, kaj vi manĝos viandon;
ĉar vi ploris al la oreloj de la Eternulo, dirante: Kiu
manĝigos al ni viandon? bone estis al ni en Egiptujo —
tial la Eternulo donos al vi viandon, kaj vi manĝos. 19
Ne dum unu tago vi manĝos, kaj ne dum du tagoj kaj
ne dum kvin tagoj kaj ne dum dek tagoj kaj ne dum
dudek tagoj; 20 sed dum tuta monato, ĝis ĝi eliros tra
viaj nazotruoj kaj fariĝos al vi abomenaĵo, pro tio, ke
vi malŝatis la Eternulon, kiu estas inter vi, kaj vi ploris
antaŭ Li, dirante: Por kio ni eliris el Egiptujo? 21 Kaj
Moseo diris: El sescent mil piedirantoj konsistas la
popolo, en kies mezo mi estas; kaj Vi diras: Mi donos
al ili viandon, ke ili manĝos dum tuta monato! 22
Ĉu oni buĉu por ili ŝafojn kaj bovojn, por ke sufiĉu
por ili? aŭ ĉu ĉiujn fiŝojn de la maro oni kolektu por
ili, por ke sufiĉu por ili? 23 Tiam la Eternulo diris al
Moseo: Ĉu la brako de la Eternulo estas tro mallonga?
nun vi vidos, ĉu plenumiĝos al vi Mia vorto, aŭ ne. 24
Kaj Moseo eliris, kaj transdiris al la popolo la vortojn
de la Eternulo; kaj li kolektis sepdek virojn el la
plejaĝuloj de la popolo, kaj li starigis ilin ĉirkaŭ la
tabernaklo. 25 Kaj la Eternulo malleviĝis en nubo kaj
parolis kun li, kaj Li deprenis iom de la spirito, kiu
estis sur li, kaj metis sur la sepdek virojn plejaĝulojn.
Kaj kiam haltis sur ili la spirito, ili ekprofetis kaj ne
ĉesis. 26 Sed restis du viroj en la tendaro; la nomo de
unu estis Eldad, kaj la nomo de la dua estis Medad;
kaj suriris sur ilin la spirito — ĉar ili estis inter la
enskribitaj, sed ne eliris al la tabernaklo — kaj ili
ekprofetis en la tendaro. 27 Tiam kuris junulo kaj
raportis al Moseo, kaj diris: Eldad kaj Medad profetas
en la tendaro. 28 Kaj respondis Josuo, filo de Nun, kaj
servanto de Moseo detempe de lia juneco, kaj diris:
Mia sinjoro Moseo, malpermesu al ili. 29 Sed Moseo
diris al li: Ĉu vi ĵaluzas pri mi? estus dezirinde, ke
la tuta popolo de la Eternulo fariĝu profetoj, se la
Eternulo metus Sian spiriton sur ilin. 30 Kaj revenis
Moseo en la tendaron, li kaj la plejaĝuloj de Izrael. 31
Kaj vento elmoviĝis de la Eternulo, kaj alportis de la
maro koturnojn kaj ĵetis ilin sur la tendaron, sur la
spaco de unutaga irado sur unu flanko kaj sur la spaco
de unutaga irado sur la dua flanko, ĉirkaŭ la tendaro

kaj en denseco de du ulnoj super la tero. 32 Kaj la
popolo staris tiun tutan tagon kaj la tutan nokton kaj
la tutan morgaŭan tagon kaj kolektis la koturnojn;
kiu kolektis plej malmulte, kolektis dek ĥomerojn; kaj
ili diskuŝigis ilin al si ĉirkaŭ la tendaro. 33 Kiam la
viando estis ankoraŭ inter iliaj dentoj kaj ankoraŭ ne
estis konsumita, ekflamis kontraŭ la popolo la kolero
de la Eternulo, kaj la Eternulo frapis la popolon per
tre granda frapo. 34 Kaj oni donis al tiu loko la nomon
Kibrot-Hataava, ĉar tie oni enterigis la homojn, kiuj
kapricis. 35 De Kibrot-Hataava la popolo ekvojiris al
Ĥacerot kaj restis en Ĥacerot.

12 Kaj ekparolis Mirjam kaj Aaron kontraŭ Moseo
pro la edzino Etiopino, kiun li prenis; ĉar li prenis
al si edzinon Etiopinon. 2 Kaj ili diris: Ĉu nur kun
Moseo parolis la Eternulo? Li parolis ja ankaŭ kun ni.
Kaj la Eternulo tion aŭdis. 3 Sed Moseo estis homo tre
modesta, pli ol ĉiuj homoj sur la tero. 4 Kaj subite
diris la Eternulo al Moseo kaj al Aaron kaj al Mirjam:
Eliru vi tri al la tabernaklo de kunveno. Kaj ili eliris
ĉiuj tri. 5 Kaj la Eternulo malleviĝis en nuba kolono
kaj stariĝis ĉe la pordo de la tabernaklo, kaj Li vokis
Aaronon kaj Mirjamon, kaj ili ambaŭ eliris. 6 Kaj Li
diris: Aŭskultu Miajn vortojn: se iu el vi estas profeto
de la Eternulo, Mi aperas al li en vizio, Mi parolas kun
li en sonĝo; 7 sed ne tiel estas kun Mia sklavo Moseo:
en Mia tuta domo li estas konfidato. 8 Buŝon kontraŭ
buŝo Mi parolas kun li, kaj malkaŝe, ne per enigmoj;
kaj la bildon de la Eternulo li vidas. Kial vi ne timis
paroli kontraŭ Mia sklavo Moseo? 9 Kaj ekflamis la
kolero de la Eternulo kontraŭ ili, kaj Li foriris. 10 Kaj
la nubo forturniĝis de super la tabernaklo, kaj jen
Mirjam kovriĝis per lepro, kiel per neĝo. Kaj Aaron
turniĝis al Mirjam, kaj li ekvidis, ke ŝi estas lepra. 11
Kaj Aaron diris al Moseo: Mi petas, mia sinjoro, ne
kalkulu al ni kiel pekon, ke ni agis malsaĝe kaj ke ni
pekis; 12 ho, ŝi ne estu kiel malvivulo, ĉe kiu tuj post
la eliro el la ventro de sia patrino forkonsumiĝis jam
duono de la korpo. 13 Kaj Moseo ekkriis al la Eternulo,
dirante: Mi petas Vin, ho Dio, sanigu ŝin. 14 Kaj la
Eternulo diris al Moseo: Se ŝia patro estus kraĉinta
sur ŝian vizaĝon, ĉu ŝi tiam ne hontus sep tagojn? ŝi
estu do enŝlosita dum sep tagoj ekster la tendaro, kaj
poste ŝi revenu. 15 Kaj Mirjam estis enŝlosita ekster la
tendaro dum sep tagoj; kaj la popolo ne elmoviĝis,
ĝis Mirjam revenis. 16 Poste la popolo ekvojiris de
Ĥacerot kaj haltis tendare en la dezerto Paran.

13 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante:
2 Sendu virojn, ke ili esplorrigardu la landon
Kanaanan, kiun Mi donas al la Izraelidoj; po unu viro
el ĉiu tribo de iliaj patroj sendu, ĉiu estu eminentulo
inter ili. 3 Kaj Moseo sendis ilin el la dezerto Paran
laŭ la ordono de la Eternulo; ĉiuj ili estis eminentuloj
inter la Izraelidoj. 4 Kaj jen estas iliaj nomoj: el la
tribo de Ruben, Ŝamua, filo de Zakur; 5 el la tribo de
Simeon, Ŝafat, filo de Ĥori; 6 el la tribo de Jehuda,
Kaleb, filo de Jefune; 7 el la tribo de Isaĥar, Jigal,
filo de Jozef; 8 el la tribo de Efraim, Hoŝea, filo de
Nun; 9 el la tribo de Benjamen, Palti, filo de Rafu;
10 el la tribo de Zebulun, Gadiel, filo de Sodi; 11 el
la tribo de Jozef, el la tribo de Manase, Gadi, filo de
Susi; 12 el la tribo de Dan, Amiel, filo de Gemali; 13 el
la tribo de Aŝer, Setur, filo de Miĥael; 14 el la tribo
de Naftali, Naĥbi, filo de Vofsi; 15 el la tribo de Gad,
Geuel, filo de Maĥi. 16 Tio estas la nomoj de la viroj,
kiujn Moseo sendis, por esplorrigardi la landon. Kaj
Moseo donis al Hoŝea, filo de Nun, la nomon Josuo.
17 Kaj Moseo sendis ilin, por esplorrigardi la landon
Kanaanan, kaj diris al ili: Iru tien tra la Sudo kaj
suriru sur la monton; 18 kaj rigardu la landon, kia
ĝi estas; kaj la popolon, kiu loĝas en ĝi, ĉu ĝi estas
forta aŭ malforta, ĉu ĝi estas malgrandnombra aŭ
grandnombra; 19 kaj kia estas la tero, sur kiu ĝi sidas,
ĉu ĝi estas bona aŭ malbona; kaj kiaj estas la urboj,
en kiuj ĝi loĝas, ĉu en tendaroj aŭ en fortikaĵoj; 20
kaj kia estas la tero, ĉu ĝi estas grasa aŭ malgrasa, ĉu
estas sur ĝi arboj aŭ ne estas; kaj estu kuraĝaj, kaj
prenu iom el la fruktoj de la lando. Kaj tiam estis la
tempo de maturiĝado de vinberoj. 21 Kaj ili iris kaj
esplorrigardis la landon de la dezerto Cin ĝis Reĥob
antaŭ Ĥamat. 22 Kaj ili iris tra la Sudo, kaj venis ĝis
Ĥebron, kie loĝis Aĥiman, Ŝeŝaj, kaj Talmaj, idoj de
Anak. (Ĥebron estis konstruita sep jarojn antaŭ ol
Coan de Egiptujo.) 23 Kaj ili venis ĝis la valo Eŝkol, kaj
ili detranĉis tie branĉon kun unu peniko da vinberoj,
kaj ili ekportis ĝin sur stango duope; ankaŭ iom da
granatoj kaj da figoj. 24 Al tiu loko oni donis la nomon
Eŝkol, pro la peniko da vinberoj, kiun detranĉis tie la
Izraelidoj. 25 Kaj ili revenis post la esplorrigardo de la
lando post kvardek tagoj. 26 Kaj ili iris kaj venis al
Moseo kaj al Aaron kaj al la tuta komunumo de la

Izraelidoj en la dezerton Paran, en la lokon Kadeŝ,
kaj donis al ili raporton kaj al la tuta komunumo
kaj montris al ili la fruktojn de la lando. 27 Kaj ili
rakontis al li, kaj diris: Ni venis en la landon, en kiun
vi sendis nin, kaj efektive en ĝi fluas lakto kaj mielo,
kaj jen estas ĝiaj fruktoj; 28 sed forta estas la popolo,
kiu loĝas en la lando, kaj la urboj estas fortikigitaj,
tre grandaj; kaj ankaŭ la idojn de Anak ni vidis tie.
29 Amalek loĝas en la suda parto de la lando, kaj la
Ĥetidoj kaj Jebusidoj kaj Amoridoj loĝas sur la monto,
kaj la Kanaanidoj loĝas apud la maro kaj sur la bordo
de Jordan. 30 Kaj Kaleb trankviligis la popolon antaŭ
Moseo, kaj diris: Ni iros, kaj ni ekposedos ĝin, ĉar ni
povas ĝin venki. 31 Sed la viroj, kiuj iris kun li, diris:
Ni ne povas iri al tiu popolo, ĉar ĝi estas pli forta ol ni.
32 Kaj pri la lando, kiun ili esplorrigardis, ili disvastigis
inter la Izraelidoj malbonan famon, dirante: La lando,
kiun ni trapasis por esplorrigardi ĝin, estas lando, kiu
formanĝas siajn loĝantojn, kaj la tuta popolo, kiun ni
vidis en ĝi, estas homoj grandkreskaj; 33 kaj tie ni
vidis la gigantojn, la idojn de Anak el la gigantoj, kaj
ni estis en niaj okuloj kiel lokustoj, kaj tiaj ni estis
ankaŭ en iliaj okuloj.

14 Tiam tumultiĝis la tuta komunumo kaj ekkriis, kaj
la popolo ploris en tiu nokto. 2 Kaj ekmurmuris
kontraŭ Moseo kaj kontraŭ Aaron ĉiuj Izraelidoj,
kaj la tuta komunumo diris al ili: Ho, se ni estus
mortintaj en la lando Egipta, aŭ se ni mortus en ĉi
tiu dezerto! 3 Kaj por kio la Eternulo irigas nin en
tiun landon, por ke ni falu de glavo? niaj edzinoj kaj
infanoj fariĝos militakiro. Ĉu ne estas pli bone, ke ni
revenu Egiptujon? 4 Kaj ili diris unu al alia: Ni starigu
al ni estron, kaj ni reiru Egiptujon. 5 Tiam Moseo kaj
Aaron ĵetiĝis vizaĝaltere antaŭ la tuta anaro de la
komunumo de la Izraelidoj. 6 Kaj Josuo, filo de Nun,
kaj Kaleb, filo de Jefune, el tiuj, kiuj esplorrigardis la
landon, disŝiris siajn vestojn, 7 kaj ili diris al la tuta
komunumo de la Izraelidoj jene: La lando, kiun ni
trapasis, por esplorrigardi ĝin, tiu lando estas tre,
tre bona. 8 Se la Eternulo estos favorkora al ni, Li
venigos nin en tiun landon kaj donos ĝin al ni, tiun
landon, en kiu fluas lakto kaj mielo. 9 Nur ne ribelu
kontraŭ la Eternulo, kaj ne timu la popolon de la
lando, ĉar nia manĝotaĵo ili estas; ilia ŝirmo foriĝis
de ili, kaj la Eternulo estas kun ni; ne timu ilin. 10
Kaj la tuta komunumo diris, ke oni mortigu ilin per
ŝtonoj. Sed la majesto de la Eternulo aperis en la
tabernaklo de kunveno antaŭ ĉiuj Izraelidoj. 11 Kaj la
Eternulo diris al Moseo: Ĝis kiam incitados Min ĉi tiu
popolo? kaj ĝis kiam ĝi ne kredos al Mi, malgraŭ ĉiuj
pruvosignoj, kiujn Mi faris meze de ĝi? 12 Mi frapos
ĝin per pesto kaj ekstermos ĝin, kaj Mi faros el vi
popolon pli grandan kaj pli fortan ol ĝi. 13 Sed Moseo
diris al la Eternulo: Aŭdos la Egiptoj, el inter kiuj Vi
elkondukis ĉi tiun popolon per Via forto, 14 kaj ili
diros al la loĝantoj de tiu lando, kiuj aŭdis, ke Vi, la
Eternulo, estas meze de ĉi tiu popolo, kaj ke Vi, la
Eternulo, montris Vin al ili okulon kontraŭ okulo,
kaj ke Via nubo staras super ili, kaj ke Vi iras antaŭ
ili dum la tago en nuba kolono kaj dum la nokto en
kolono fajra; 15 se Vi ekstermos ĉi tiun popolon kiel
unu homon, tiam la popoloj, kiuj aŭdis la famon pri
Vi, dirus: 16 Ĉar la Eternulo ne povis venigi ĉi tiun
popolon en la landon, pri kiu Li ĵuris al ili, tial Li
buĉis ilin en la dezerto. 17 Nun montriĝu do granda la
forto de mia Sinjoro, laŭ la parolo, kiun Vi diris: 18 La
Eternulo estas longepacienca kaj multe favorkora; Li
pardonas kulpon kaj krimon, sed antaŭ Li neniu estas
senkulpa; Li punas la kulpon de patroj sur filoj kaj
nepoj, en la tria kaj kvara generacioj. 19 Ho, pardonu
la kulpon de ĉi tiu popolo laŭ Via granda favorkoreco
kaj kiel Vi pardonadis al ĉi tiu popolo de Egiptujo ĝis
nun. 20 Kaj la Eternulo diris: Mi pardonis konforme al
via diro; 21 sed kiel Mi vivas kaj kiel de la gloro de la
Eternulo estas plena la tuta tero, 22 ĉiuj homoj, kiuj
vidis Mian gloron kaj Miajn pruvosignojn, kiujn Mi
faris en Egiptujo kaj en la dezerto, kaj provis Min jam
dek fojojn kaj ne aŭskultis Mian voĉon, 23 ne vidos la
landon, pri kiu Mi ĵuris al iliaj patroj, kaj ĉiuj, kiuj
incitis Min, ne vidos ĝin. 24 Sed Mian sklavon Kaleb,
ĉar estis en li spirito alia kaj li estis obeema al Mi, lin
Mi venigos en la landon, en kiun li iris, kaj lia idaro
heredos ĝin. 25 Sed la Amalekidoj kaj Kanaanidoj
loĝas en la valo; morgaŭ turnu vin kaj ekiru en la
dezerton sur la vojo al la Ruĝa Maro. 26 Kaj la Eternulo
ekparolis al Moseo kaj al Aaron, dirante: 27 Ĝis kiam
ĉi tiu malbona komunumo murmuros kontraŭ Mi?
la murmuradon de la Izraelidoj, kiun ili murmuras
kontraŭ Mi, Mi aŭdis. 28 Diru al ili: Kiel Mi vivas, diras
la Eternulo, kiel vi parolis al Miaj oreloj, tiel Mi faros
al vi: 29 en ĉi tiu dezerto falos viaj kadavroj, kaj el ĉiuj
viaj kalkulitoj, laŭ via tuta kalkulo, en la aĝo de dudek
jaroj kaj pli, kiuj murmuris kontraŭ Mi, 30 neniu venos

en la landon, pri kiu Mi levis Mian manon, ke Mi
loĝigos vin en ĝi, neniu krom Kaleb, filo de Jefune,
kaj Josuo, filo de Nun. 31 Viajn infanojn, pri kiuj vi
diris, ke ili fariĝos militakiro, Mi venigos tien, kaj ili
ekkonos la landon, kiun vi malŝatis. 32 Sed vi — viaj
kadavroj falos en ĉi tiu dezerto. 33 Kaj viaj filoj estos
paŝtistoj en la dezerto dum kvardek jaroj, kaj portos
vian malĉastecon, ĝis kiam viaj kadavroj konsumiĝos
en la dezerto. 34 Laŭ la nombro de la tagoj, dum kiuj
vi esplorrigardis la landon, kvardek tagoj, po jaro pro
ĉiu tago, vi portos la punon pro via malbonago dum
kvardek jaroj, por ke vi ekkonu Mian malfavoron. 35
Mi, la Eternulo, tion diris: tion Mi faros al tiu tuta
malbona komunumo, kiu ribelis kontraŭ Mi; en ĉi
tiu dezerto ili pereos kaj ĉi tie ili mortos. 36 Kaj la
viroj, kiujn Moseo sendis, por esplorrigardi la landon,
kaj kiuj revenis kaj murmurigis kontraŭ li la tutan
komunumon, disvastigante malbonan famon pri la
lando — 37 tiuj viroj, kiuj disvastigis malbonan famon
pri la lando, mortis de pesto antaŭ la Eternulo. 38
Sed Josuo, filo de Nun, kaj Kaleb, filo de Jefune, restis
vivaj el tiuj viroj, kiuj iris, por esplorrigardi la landon.
39 Kaj Moseo diris tiujn vortojn al ĉiuj Izraelidoj, kaj la
popolo tre malĝojis. 40 Kaj ili leviĝis frumatene, kaj
iris sur la supron de la monto, dirante: Jen ni estas,
kaj ni iru sur la lokon, pri kiu parolis la Eternulo; ĉar
ni pekis. 41 Sed Moseo diris: Por kio vi kontraŭagas
al la vortoj de la Eternulo? tio ja ne sukcesos. 42
Ne iru, ĉar la Eternulo ne estas inter vi; kaj ne estu
frapataj antaŭ viaj malamikoj. 43 Ĉar la Amalekidoj
kaj la Kanaanidoj estas tie antaŭ vi, kaj vi falos de
glavo; ĉar pro tio, ke vi deturniĝis de la Eternulo, la
Eternulo ne estos kun vi. 44 Sed ili obstinis, kaj iris sur
la supron de la monto; tamen la kesto de la interligo
de la Eternulo kaj Moseo ne eliris el la tendaro. 45 Kaj
malsupreniris la Amalekidoj kaj la Kanaanidoj, kiuj
loĝis sur la monto, kaj batis ilin kaj persekutis ilin ĝis
Ĥorma.

**15** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2
Parolu al la Izraelidoj, kaj diru al ili: Kiam vi
venos en la landon de via loĝado, kiun Mi donas al
vi, 3 kaj vi faros fajroferon al la Eternulo, bruloferon
aŭ buĉoferon, plenumante sanktan promeson aŭ
farante memvolan oferon, aŭ en viaj festoj, por fari
agrablan odoraĵon al la Eternulo el grandaj brutoj aŭ
el malgrandaj: 4 tiam la oferdonanto devas alporti al
la Eternulo farunoferon el dekono de efo da delikata
faruno, miksita kun kvarono de hino da oleo; 5 kaj
da vino por verŝofero kvaronon de hino aldonu al la
brulofero aŭ al la buĉofero al ĉiu ŝafido. 6 Kaj ĉe ŝafo
alportu farunoferon el du dekonoj de efo da delikata
faruno, miksita kun triono de hino da oleo. 7 Kaj da
vino por verŝofero trionon de hino; alportu tion kiel
agrablan odoraĵon al la Eternulo. 8 Kaj se bovidon vi
alportos kiel bruloferon aŭ buĉoferon, por plenumi
sanktan promeson, aŭ kiel pacoferon al la Eternulo, 9
tiam kun la bovido oni devas alporti farunoferon el
tri dekonoj de efo da delikata faruno, miksita kun
duono de hino da oleo; 10 kaj da vino por verŝofero
alportu duonon de hino kiel fajroferon, agrablan
odoraĵon al la Eternulo. 11 Tiel oni devas fari ĉe ĉiu
bovo aŭ ĉe ĉiu ŝafo aŭ ĉe brutido el ŝafoj aŭ kaproj.
12 Laŭ la nombro de la oferoj, kiujn vi faros, agu tiel
ĉe ĉiu, laŭ ilia nombro. 13 Ĉiu indiĝeno faru tion
tiamaniere, alportante fajroferon, agrablan odoraĵon
al la Eternulo. 14 Kaj se loĝas inter vi fremdulo aŭ kiu
ajn estas inter vi en viaj generacioj, kaj li alportos
fajroferon, agrablan odoraĵon al la Eternulo, tiam li
faru tiel, kiel vi faras. 15 Por la tuta komunumo devas
esti unu leĝo, por vi kaj por la fremdulo inter vi; leĝo
eterna en viaj generacioj, kiel por vi, tiel ankaŭ por la
fremdulo, estu antaŭ la Eternulo. 16 Unu leĝo kaj unu
rajto estu por vi, kaj por la fremdulo, kiu loĝas kun
vi. 17 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 18
Parolu al la Izraelidoj, kaj diru al ili: Kiam vi venos
en la landon, en kiun Mi vin kondukas, 19 kaj vi
manĝos la panon de tiu lando, tiam donu oferdonon
al la Eternulo. 20 Kiel unuaaĵon el via pasto alportu
oferdone kukon; kiel oferdonon el la grenejo, tiel
oferdonu ĝin. 21 El la unuaaĵoj de via pasto donu al la
Eternulo oferdonon en viaj generacioj. 22 Kaj se vi
eraros, kaj ne plenumos ĉiujn tiujn ordonojn, kiujn
la Eternulo diris al Moseo, 23 ĉion, kion la Eternulo
ordonis al vi per Moseo, de la tago, en kiu la Eternulo
ordonis, kaj plue, en viaj generacioj; 24 tiam se pro
neatento de la komunumo estis farita la eraro, la tuta
komunumo alportu unu bovidon kiel bruloferon, kiel
agrablan odoraĵon al la Eternulo, kun ĝia farunofero
kaj ĝia verŝofero laŭ la regularo, kaj unu kapron
kiel pekoferon. 25 Kaj la pastro pekliberigos la tutan
komunumon de la Izraelidoj, kaj estos pardonite al
ili; ĉar tio estis eraro, kaj ili alportis sian oferon,
fajroferon al la Eternulo, kaj sian pekoferon antaŭ

la Eternulo pro sia peko. 26 Kaj estos pardonite al la
tuta komunumo de la Izraelidoj, kaj al la fremdulo,
kiu loĝas inter ili; ĉar la tuta popolo eraris. 27 Kaj se
unu homo pekos per eraro, tiam li alportu kaprinon
jaraĝan kiel pekoferon. 28 Kaj la pastro pekliberigos
la homon, kiu eraris, pekante per eraro antaŭ la
Eternulo; li pekliberigos lin, kaj estos pardonite al
li. 29 Kiel por la indiĝeno el la Izraelidoj, tiel ankaŭ
por la fremdulo, kiu loĝas inter ili, unu leĝo estu
por vi por tiu, kiu eraris. 30 Sed se iu faris ion per
mano malhumila, ĉu li estas indiĝeno, ĉu fremdulo,
li blasfemis kontraŭ la Eternulo; kaj ekstermiĝos
tiu homo el inter sia popolo; 31 ĉar la vorton de la
Eternulo li malestimis kaj Lian ordonon li malobeis;
ekstermiĝu tiu homo, lia peko estas sur li. 32 Kiam
la Izraelidoj estis en la dezerto, ili trovis homon,
kiu kolektis lignon en tago sabata. 33 Kaj tiuj, kiuj
trovis lin, kiam li kolektis lignon, alkondukis lin al
Moseo kaj al Aaron kaj al la tuta komunumo. 34
Kaj oni metis lin en gardejon, ĉar ne estis ankoraŭ
klarigite, kion oni devas fari al li. 35 Kaj la Eternulo
diris al Moseo: Tiu homo mortu; per ŝtonoj mortigu
lin la tuta komunumo ekster la tendaro. 36 Kaj la
tuta komunumo elkondukis lin ekster la tendaron kaj
mortigis lin per ŝtonoj, kaj li mortis; kiel la Eternulo
ordonis al Moseo. 37 Kaj la Eternulo diris al Moseo
jene: 38 Parolu al la Izraelidoj, kaj diru al ili, ke ili
faru al si kvastojn sur la randoj de siaj vestoj en
siaj generacioj, kaj ili enmetu en la kvaston de la
rando fadenon bluan. 39 Kaj ĝi estu por vi kvasto,
kiun rigardante, vi rememoros ĉiujn ordonojn de la
Eternulo kaj plenumos ilin kaj ne iros laŭ viaj koroj
kaj viaj okuloj, kiujn vi malĉaste sekvadas; 40 por ke
vi memoru kaj plenumu ĉiujn Miajn ordonojn kaj estu
sanktaj antaŭ via Dio. 41 Mi estas la Eternulo, via Dio,
kiu elkondukis vin el la lando Egipta, por ke Mi estu
via Dio. Mi estas la Eternulo, via Dio.

**16** Kaj entreprenis Koraĥ, filo de Jichar, filo de
Kehat, ido de Levi, kaj Datan kaj Abiram, filoj de
Eliab, kaj On, filo de Pelet, idoj de Ruben, 2 kaj stariĝis
antaŭ Moseo, kaj kun ili el la Izraelidoj ducent kvindek
viroj, estroj de la komunumo, vokataj al la kunvenoj;
homoj eminentaj; 3 kaj ili kolektiĝis kontraŭ Moseo
kaj kontraŭ Aaron, kaj diris al ili: Sufiĉe por vi! la tuta
komunumo, ĉiuj estas ja sanktaj, kaj inter ili estas la
Eternulo; kial do vi estrigas vin super la komunumo
de la Eternulo? 4 Kaj Moseo tion aŭdis, kaj ĵetis sin
vizaĝaltere. 5 Kaj li ekparolis al Koraĥ kaj al lia tuta
anaro, dirante: Morgaŭ la Eternulo montros, kiu estas
Lia kaj kiu estas sankta, por ke Li alproksimigu lin
al Si; kaj kiun Li elektos, tiun Li alproksimigos al Si.
6 Faru jenon: prenu al vi incensujojn, Koraĥ kaj lia
tuta anaro, 7 kaj metu sur ilin fajron kaj metu sur
ilin incenson antaŭ la Eternulo morgaŭ; kaj kiun la
Eternulo elektos, tiu estos la sanktulo. Estas troe,
ho Levidoj! 8 Kaj Moseo diris al Koraĥ: Aŭskultu do,
idoj de Levi: 9 ĉu ne sufiĉas al vi, ke la Dio de la
Izraelidoj distingis vin inter la komunumo de Izrael,
por alproksimigi vin al Si, por ke vi plenumu la
servojn en la tabernaklo de la Eternulo kaj por ke
vi staru antaŭ la komunumo, por servi al ĝi? 10 Kaj
Li alproksimigos vin kaj ĉiujn viajn fratojn, la idojn
de Levi, kun vi; kaj nun vi postulas eĉ pastrecon! 11
Tiamaniere vi kaj via tuta anaro ekribelis kontraŭ
la Eternulo; sed kio estas Aaron, ke vi murmuras
kontraŭ li? 12 Kaj Moseo sendis voki Datanon kaj
Abiramon, filojn de Eliab; sed ili diris: Ni ne iros! 13 Ĉu
ne sufiĉas, ke el lando, en kiu fluas lakto kaj mielo, vi
elirigis nin, por pereigi nin en la dezerto? kaj vi volas
ankoraŭ regi super ni? 14 Ja ne en landon, en kiu fluas
lakto kaj mielo, vi venigis nin, kaj vi ne donis al ni
posedaĵon el kampoj kaj vinberĝardenoj! ĉu vi volas
blindigi la okulojn de ĉi tiuj homoj? ni ne iros. 15 Kaj
tio tre kolerigis Moseon, kaj li diris al la Eternulo: Ne
turnu Vin al ilia ofero; eĉ unu azenon mi ne prenis
de ili, kaj al neniu el ili mi faris ian malbonon. 16
Kaj Moseo diris al Koraĥ: Vi kaj via tuta anaro estu
antaŭ la Eternulo morgaŭ, vi kaj ili kaj Aaron. 17 Kaj
prenu ĉiu sian incensujon kaj metu sur ĝin incenson,
kaj alportu antaŭ la Eternulon ĉiu sian incensujon,
ducent kvindek incensujojn; ankaŭ vi kaj Aaron, ĉiu
sian incensujon. 18 Kaj ili prenis ĉiu sian incensujon
kaj metis sur ĝin fajron kaj ŝutis sur ĝin incenson, kaj
ili stariĝis ĉe la pordo de la tabernaklo de kunveno,
ankaŭ Moseo kaj Aaron. 19 Kaj kunvenigis kontraŭ ili
Koraĥ la tutan anaron ĉe la pordo de la tabernaklo
de kunveno; kaj montriĝis la majesto de la Eternulo
al la tuta komunumo. 20 Kaj la Eternulo ekparolis al
Moseo kaj al Aaron, dirante: 21 Apartiĝu de ĉi tiu
anaro, kaj Mi ekstermos ilin en momento. 22 Kaj ili
ĵetis sin vizaĝaltere, kaj diris: Ho Dio, Dio de la spiritoj
de ĉia karno! unu pekis, kaj Vi volas koleri la tutan
komunumon? 23 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo,

dirante: 24 Diru al la komunumo jene: Foriru de ĉirkaŭ
la loĝejo de Koraĥ, Datan, kaj Abiram. 25 Kaj Moseo
leviĝis kaj iris al Datan kaj Abiram, kaj post li iris la
plejaĝuloj de Izrael. 26 Kaj li diris al la komunumo:
Foriru do de la tendoj de tiuj malbonaj homoj, kaj
tuŝu nenion, kio apartenas al ili, por ke vi ne pereu
pro ĉiuj iliaj pekoj. 27 Kaj ili foriris de ĉirkaŭ la loĝejo
de Koraĥ, Datan, kaj Abiram; sed Datan kaj Abiram
eliris, kaj staris ĉe la pordo de siaj tendoj kune kun
siaj edzinoj, filoj, kaj malgrandaj infanoj. 28 Kaj Moseo
diris: Per tio vi ekscios, ke la Eternulo sendis min,
por fari ĉiujn tiujn aferojn, kaj ke mi ne faris laŭ
mia koro: 29 se per la ordinara morto de ĉiuj homoj
mortos ĉi tiuj, aŭ ilin trafos la sorto, kiu povas trafi
ĉiun homon, tiam ne la Eternulo sendis min. 30 Sed se
novan aperon kreos la Eternulo, kaj la tero malfermos
sian buŝon, kaj englutos ilin, kaj ĉion, kio apartenas al
ili, kaj ili vivaj malsupreniros en Ŝeolon, tiam sciu,
ke ĉi tiuj homoj blasfemis kontraŭ la Eternulo. (Sheol
h7585) 31 Apenaŭ li finis paroli ĉion tion, disfendiĝis la
tero, kiu estis sub ili; 32 kaj la tero malfermis sian
buŝon kaj englutis ilin kaj iliajn domojn kaj ĉiujn
homojn de Koraĥ kaj la tutan havon. 33 Kaj ili, kaj
ĉio, kio apartenis al ili, malsupreniris vivaj en Ŝeolon,
kaj fermiĝis super ili la tero, kaj ili forpereis el inter
la komunumo. (Sheol h7585) 34 Kaj ĉiuj Izraelidoj, kiuj
estis ĉirkaŭ ili, forkuris ĉe ilia krio; ĉar ili diris: Ke
nin ankaŭ la tero ne englutu. 35 Kaj fajro eliris de
la Eternulo, kaj ĝi forbruligis tiujn ducent kvindek
homojn, kiuj alportis la incenson. 36 Kaj la Eternulo
ekparolis al Moseo, dirante: 37 Diru al Eleazar, filo
de la pastro Aaron, ke li levu la incensujojn el la
brulintaĵo, sed la fajron disĵetu malproksimen; ĉar
sanktiĝis 38 la incensujoj de tiuj, kiuj per sia vivo pagis
pro la peko; kaj oni faru el ili tavoletojn, por tegi la
altaron; ĉar oni alportis ilin antaŭ la Eternulon, kaj ili
sanktiĝis; kaj ili estu memoriga signo por la Izraelidoj.
39 Kaj Eleazar, la pastro, prenis la kuprajn incensujojn,
kiujn alportis la bruligitaj, kaj tavoligis ilin, por tegi la
altaron 40 memorige por la Izraelidoj, ke laiko, kiu ne
estas el la idoj de Aaron, ne alproksimiĝu, por incensi
antaŭ la Eternulo, por ke li ne fariĝu kiel Koraĥ kaj
lia anaro, kiel diris la Eternulo al li per Moseo. 41
Kaj en la sekvanta tago la tuta komunumo de la
Izraelidoj ekmurmuris kontraŭ Moseo kaj kontraŭ
Aaron, dirante: Vi mortigis la popolon de la Eternulo.
42 Kaj kiam kolektiĝis la komunumo kontraŭ Moseo
kaj kontraŭ Aaron, ili turniĝis al la tabernaklo de
kunveno; kaj jen kovris ĝin la nubo kaj aperis la
majesto de la Eternulo. 43 Kaj eniris Moseo kaj Aaron
en la antaŭan parton de la tabernaklo de kunveno. 44
Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 45 Foriĝu
el inter ĉi tiu komunumo, kaj Mi pereigos ilin en
momento. Sed ili ĵetiĝis vizaĝaltere. 46 Kaj Moseo
diris al Aaron: Prenu vian incensujon kaj metu sur ĝin
fajron de la altaro kaj ŝutu sur ĝin incenson kaj iru
rapide al la komunumo kaj pekliberigu ĝin; ĉar eliris
kolero de antaŭ la Eternulo, komenciĝis la frapado.
47 Tiam Aaron prenis, kiel diris Moseo, kaj kuris en
la mezon de la komunumo; kaj jen komenciĝis jam
la frapado en la popolo. Kaj li metis la incenson
kaj pekliberigis la popolon. 48 Li stariĝis inter la
mortintoj kaj la vivantoj, kaj la frapado ĉesiĝis. 49 Kaj
la nombro de la mortintoj de la frapado estis dek kvar
mil sepcent, krom tiuj, kiuj mortis pro Koraĥ. 50 Kaj
Aaron revenis al Moseo al la pordo de la tabernaklo
de kunveno; kaj la frapado ĉesiĝis.

17 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante:
2 Parolu al la Izraelidoj, kaj prenu de ili po
unu bastono de ĉiu tribo, de ĉiuj iliaj triboj dek du
bastonojn, kaj ĉies nomon skribu sur lia bastono. 3
Sed la nomon de Aaron skribu sur la bastono de Levi;
ĉar unu bastono devas esti de la estro de ilia tribo. 4
Kaj kuŝigu ilin en la tabernaklo de kunveno antaŭ
la kesto de atesto, kie Mi aperas al vi. 5 Kaj kiun
viron Mi elektos, ties bastono ekfloros; kaj tiel Mi
silentigos antaŭ Mi la murmuradon de la Izraelidoj,
kiun ili murmuras kontraŭ vi. 6 Kaj Moseo parolis
al la Izraelidoj, kaj ĉiuj iliaj estroj donis al li po unu
bastono de ĉiu tribo, laŭ iliaj triboj dek du bastonojn;
kaj la bastono de Aaron estis inter iliaj bastonoj. 7
Kaj Moseo kuŝigis la bastonojn antaŭ la Eternulo en
la tabernaklo de atesto. 8 Kaj en la sekvanta tago
Moseo venis en la tabernaklon de atesto; kaj jen
ekfloris la bastono de Aaron de la domo de Levi, kaj
ĝi elirigis burĝonojn kaj donis florojn kaj maturigis
migdalojn. 9 Kaj Moseo elportis ĉiujn bastonojn de
antaŭ la Eternulo al ĉiuj Izraelidoj; kaj ili vidis, kaj
ĉiu prenis sian bastonon. 10 Kaj la Eternulo diris al
Moseo: Remetu la bastonon de Aaron antaŭ la keston
de atesto, por ke ĝi estu gardata kiel memorsigno por
la ribelemuloj, por ke ĉesiĝu ilia murmurado kontraŭ
Mi, kaj por ke ili ne mortu. 11 Kaj Moseo faris tion;

kiel la Eternulo ordonis al li, tiel li faris. 12 Kaj la
Izraelidoj diris al Moseo: Jen ni mortas, ni pereas, ni
ĉiuj pereas; 13 ĉiu, kiu alproksimiĝas al la tabernaklo
de la Eternulo, mortas; ĉu ni ĉiuj mortos?

**18** Kaj la Eternulo diris al Aaron: Vi kaj viaj filoj
kaj la domo de via patro kune kun vi portos
sur vi la kulpon pri la tabernaklo, kaj vi kaj viaj filoj
kune kun vi portos la kulpon pri via pastrado. 2
Ankaŭ viajn fratojn, la tribon de Levi, la genton de
via patro, alproksimigu al vi; ili aliĝu al vi kaj servu
vin; kaj vi kune kun viaj filoj estos ĉe la tabernaklo
de atesto. 3 Kaj ili prizorgu la gardadon de vi kaj la
gardadon de la tuta tabernaklo; nur al la objektoj de
la sanktejo kaj al la altaro ili ne alproksimiĝu, por ke
ili ne mortu, kiel ili, tiel ankaŭ vi. 4 Ili aliĝu al vi kaj
plenumu la zorgadon pri la tabernaklo de kunveno,
koncerne ĉiujn servojn en la tabernaklo; sed laiko ne
alproksimiĝu al vi. 5 Kaj plenumu la zorgadon pri
la sanktejo kaj la zorgadon pri la altaro, por ke ne
estu plu kolero kontraŭ la Izraelidoj. 6 Kaj Mi prenis
viajn fratojn, la Levidojn, el inter la Izraelidoj; donace
al vi ili estas donitaj por la Eternulo, por plenumi la
servojn en la tabernaklo de kunveno. 7 Kaj vi kune
kun viaj filoj plenumu vian pastradon en ĉio, kio
koncernas la altaron, kaj tion, kio estas malantaŭ la
kurteno, kaj servu; kiel donacon Mi donas al vi la
servadon de via pastrado; sed laiko, kiu alproksimiĝos,
estu mortigita. 8 Kaj la Eternulo diris al Aaron: Mi
donis al vi la zorgadon pri Miaj oferdonoj: ĉion, kion
konsekras la Izraelidoj, Mi donis al vi kaj al viaj filoj,
kiel sanktan apartenaĵon per leĝo eterna. 9 Jen kio
apartenas al vi el la plejsanktaĵoj, el la bruligataĵo: ĉiu
ilia ofero, kiel ĉiu ilia farunofero, tiel ankaŭ ĉiu ilia
pekofero kaj ĉiu ilia kulpofero, kiun ili donos al Mi,
estas plejsanktaĵo por vi kaj por viaj filoj. 10 Sur la
plej sankta loko manĝu tion; ĉiu virseksulo povas tion
manĝi. Sankta ĝi estu por vi. 11 Kaj jen kio apartenas
al vi: iliaj donacataj oferdonoj el ĉiuj skuoferoj de
la Izraelidoj; al vi Mi donis ilin kaj al viaj filoj kaj
al viaj filinoj kune kun vi, per leĝo eterna; ĉiu pura
en via domo povas tion manĝi. 12 Ĉion plej bonan
el oleo kaj ĉion plej bonan el mosto kaj el greno,
iliajn unuaaĵojn, kiujn ili donas al la Eternulo, Mi
fordonis al vi. 13 La unuaj produktoj de ĉio, kio estas
sur ilia tero, kiujn ili alportos al la Eternulo, apartenas
al vi; ĉiu pura en via domo povas tion manĝi. 14
Ĉio, kio estas konsekrita en Izrael, apartenas al vi.
15 Ĉiu utermalferminto el ĉiuj vivaj estaĵoj, kiun ili
alportas al la Eternulo, kiel el homoj, tiel ankaŭ el
brutoj, apartenas al vi; tamen prenu elaĉeton pro
unuenaskito el homoj, kaj ankaŭ pro unuenaskito el
malpuraj brutoj prenu elaĉeton. 16 Ilia elaĉeto estas:
post la aĝo de unu monato prenu elaĉeton laŭ via
takso, kvin siklojn da arĝento laŭ la sankta siklo, kiu
konsistas el dudek geroj. 17 Nur pro unuenaskito el
bovoj aŭ pro unuenaskito el ŝafoj aŭ pro unuenaskito
el kaproj ne prenu elaĉeton: ili estas sanktaĵo; per
ilia sango aspergu la altaron, kaj ilian sebon bruligu
kiel fajroferon, agrablan odoraĵon al la Eternulo. 18
Sed ilia viando apartenas al vi; kiel la brustaĵo de
skuofero kaj la dekstra femuro, ĝi apartenas al vi. 19
Ĉiujn sanktajn oferdonojn, kiujn alportas la Izraelidoj
al la Eternulo, Mi donis al vi kaj al viaj filoj kaj al viaj
filinoj kune kun vi, per leĝo eterna. Tio estas interligo
de salo por eterne antaŭ la Eternulo por vi kaj por via
idaro kune kun vi. 20 Kaj la Eternulo diris al Aaron: En
ilia tero vi ne havos heredaĵon, kaj parton vi ne havos
inter ili; Mi estas via parto kaj via heredaĵo meze de
la Izraelidoj. 21 Kaj al la filoj de Levi Mi donis kiel
heredaĵon dekonaĵon de ĉio en Izrael, rekompence pro
ilia servado, kiun ili faras, la servado en la tabernaklo
de kunveno. 22 Kaj la Izraelidoj ne alproksimiĝu plu al
la tabernaklo de kunveno, por ke ili ne portu pekon
kaj ne mortu. 23 Nur la Levidoj mem plenumu la
servadon en la tabernaklo de kunveno kaj portu sur si
ilian pekon; leĝo eterna tio estu en viaj generacioj;
kaj inter la Izraelidoj ili ne havos posedaĵon. 24
Ĉar la dekonaĵon de la Izraelidoj, kiun ili alportos
al la Eternulo oferdone, Mi donis al la Levidoj kiel
posedaĵon; tial Mi diris al ili, ke inter la Izraelidoj ili ne
havu posedaĵon. 25 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo,
dirante: 26 Al la Levidoj parolu, kaj diru al ili: Kiam vi
prenos de la Izraelidoj la dekonaĵon, kiun Mi donas al
vi de ili kiel posedaĵon, tiam levu el ĝi oferdonon por
la Eternulo, dekonaĵon el la dekonaĵo. 27 Kaj estos
kalkulata al vi via oferdono, kiel greno el la garbejo
kaj kiel abundaĵo el la vinpremejo. 28 Tiamaniere
vi ankaŭ alportos oferdonon al la Eternulo el ĉiuj
viaj dekonaĵoj, kiujn vi prenos de la Izraelidoj; kaj vi
donos el ili la oferdonon, destinitan por la Eternulo,
al la pastro Aaron. 29 El ĉiuj ricevataj donacoj alportu
oferdonon al la Eternulo, el ĉio plej bona en ĝi ĝian
parton konsekritan. 30 Kaj diru al ili: Kiam vi alportos

el tio la plej bonan parton, tiam ĝi estos kalkulata al
la Levidoj kiel enspezo el la garbejo kaj kiel enspezo
el la vinpremejo. 31 Kaj vi povas tion manĝi sur ĉiu
loko, vi kaj via domo; ĉar tio estas pago al vi pro via
servado en la tabernaklo de kunveno. 32 Kaj vi ne
portos pri tio pekon, kiam vi alportos la plej bonan
parton el tio; kaj vi ne malsanktigos la konsekritaĵon
de la Izraelidoj, kaj vi ne mortos.

**19** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo kaj al Aaron,
dirante: 2 Jen estas la instrukcio de la leĝo, kiun
la Eternulo starigis, dirante: Diru al la Izraelidoj, ke
ili venigu al vi bovinon ruĝan, sanan, kiu ne havas
difekton kaj sur kiun ne estis metita jugo. 3 Kaj donu
ĝin al Eleazar, la pastro, kaj li elkonduku ĝin ekster
la tendaron, kaj oni buĉu ĝin antaŭ li. 4 Kaj Eleazar,
la pastro, prenu iom el ĝia sango per sia fingro kaj
aspergu sep fojojn per ĝia sango en la direkto al la
antaŭa parto de la tabernaklo de kunveno. 5 Kaj oni
forbruligu la bovinon antaŭ liaj okuloj: ĝian felon kaj
ĝian karnon kaj ĝian sangon kune kun ĝia sterko oni
forbruligu. 6 Kaj la pastro prenu cedran lignon kaj
hisopon kaj ruĝan lanon kaj ĵetu en la brulaĵon de la
bovino. 7 Kaj la pastro lavu siajn vestojn kaj banu
sian korpon en akvo, kaj poste li venu en la tendaron,
kaj la pastro restos malpura ĝis la vespero. 8 Kaj
tiu, kiu ĝin forbruligis, lavu siajn vestojn per akvo
kaj banu sian korpon en akvo, kaj li restos malpura
ĝis la vespero. 9 Kaj viro pura kolektu la cindron de
la bovino kaj metu ĝin ekster la tendaro sur puran
lokon, kaj ĝi estos konservata por la komunumo de la
Izraelidoj por la akvo puriga: tio estas ofero propeka.
10 Kaj la kolektinto de la cindro de la bovino lavu siajn
vestojn, kaj li restos malpura ĝis la vespero. Tio estos
leĝo eterna por la Izraelidoj, kaj por la fremduloj, kiuj
loĝas inter ili. 11 Kiu ektuŝis la kadavron de ia homo,
tiu restos malpura dum sep tagoj; 12 li senpekigos sin
per ĝi en la tria tago kaj en la sepa tago, kaj li fariĝos
pura; kaj se li ne senpekigos sin en la tria tago kaj en
la sepa tago, li ne fariĝos pura. 13 Ĉiu, kiu ektuŝis la
kadavron de homo, kiu mortis, kaj ne senpekigos sin,
tiu malpurigas la loĝejon de la Eternulo; kaj tiu homo
ekstermiĝos el inter Izrael; ĉar li ne estas aspergita
per puriga akvo, li estas malpura, lia malpureco estas
ankoraŭ sur li. 14 Jen estas la leĝo: se homo mortis en
tendo, tiam ĉiu, kiu venas en la tendon, kaj ĉio, kio
troviĝas en la tendo, estos malpura dum sep tagoj.
15 Kaj ĉiu nefermita vazo, sur kiu ne estas kovrilo
kun ŝnureto, estas malpura. 16 Kaj ĉiu, kiu ektuŝis
sur kampo glavmortigiton aŭ mortinton aŭ oston de
homo aŭ tombon, estos malpura dum sep tagoj. 17
Oni prenu por la malpurulo iom el la cindro de la
bruligita pekofero kaj verŝu sur ĝin akvon vivan en
vazon; 18 kaj viro pura prenu hisopon kaj trempu ĝin
en akvo, kaj aspergu la tendon kaj ĉiujn vazojn, kaj la
homojn, kiuj tie estis, kaj la tuŝinton de la osto aŭ
de la mortigito aŭ de la mortinto aŭ de la tombo. 19
Kaj la purulo aspergu la malpurulon en la tria tago
kaj en la sepa tago kaj senpekigu lin en la sepa tago;
kaj li lavu siajn vestojn kaj banu sin en akvo, kaj
vespere li estos pura. 20 Kaj se iu estos malpura kaj ne
senpekigos sin, tiu ekstermiĝos el inter la komunumo,
ĉar li malpurigis la sanktejon de la Eternulo: li ne
estas aspergita per puriga akvo, li estas malpura. 21
Kaj tio estu por vi leĝo eterna. Kaj tiu, kiu aspergis
per la puriga akvo, lavu siajn vestojn; kaj la ektuŝinto
de la puriga akvo estos malpura ĝis la vespero. 22 Kaj
ĉio, kion ektuŝos la malpurulo, estos malpura; kaj la
homo, kiu ektuŝis, estos malpura ĝis la vespero.

**20** Kaj venis la Izraelidoj, la tuta komunumo, en la
dezerton Cin en la unua monato; kaj la popolo
ekloĝis en Kadeŝ, kaj tie mortis Mirjam kaj estis tie
enterigita. 2 Kaj ne estis akvo por la komunumo, kaj
ili kolektiĝis kontraŭ Moseo kaj Aaron. 3 Kaj la popolo
malpacis kontraŭ Moseo, kaj ili diris jene: Ho, kial
ni ne mortis tiam, kiam mortis niaj fratoj antaŭ la
Eternulo! 4 Kaj kial vi venigis la komunumon de la
Eternulo en ĉi tiun dezerton, por ke ni mortu ĉi tie
kune kun niaj brutoj? 5 Kaj por kio vi elirigis nin el
Egiptujo, por venigi nin al ĉi tiu malbona loko, kie oni
ne povas semi, kie ne ekzistas figarboj nek vinberoj
nek granatoj, kaj kie ne ekzistas akvo por trinki? 6
Tiam Moseo kaj Aaron iris de antaŭ la komunumo
al la pordo de la tabernaklo de kunveno kaj ĵetiĝis
vizaĝaltere, kaj la majesto de la Eternulo aperis al ili.
7 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 8 Prenu
la bastonon kaj kunvenigu la komunumon, vi kaj via
frato Aaron, kaj parolu antaŭ iliaj okuloj al la roko,
kaj ĝi donos sian akvon; kaj vi eligos por ili akvon
el la roko, kaj vi trinkigos la komunumon kaj ĝiajn
brutojn. 9 Kaj Moseo prenis la bastonon de antaŭ la
Eternulo, kiel Li ordonis al li. 10 Kaj Moseo kaj Aaron
kunvenigis la komunumon antaŭ la rokon, kaj li diris

al ili: Aŭskultu, ho ribeluloj, ĉu el ĉi tiu roko ni eligu
por vi akvon? 11 Kaj Moseo levis sian manon kaj frapis
la rokon per sia bastono du fojojn; kaj ekfluis multe
da akvo, kaj trinkis la komunumo kaj ĝiaj brutoj. 12
Tiam la Eternulo diris al Moseo kaj al Aaron: Pro
tio, ke vi ne kredis je Mi, por montri Min sankta en
la okuloj de la Izraelidoj, tial vi ne venigos ĉi tiun
komunumon en la landon, kiun Mi donas al ili. 13 Tio
estas la Akvo de Malpaco, ĉe kiu la Izraelidoj malpacis
kontraŭ la Eternulo kaj per kiu Li montris Sin sankta
al ili. 14 Kaj Moseo sendis senditojn el Kadeŝ al la reĝo
de Edom, por diri: Tiel diras via frato Izrael: Vi scias
ĉiujn malfacilaĵojn, kiuj trafis nin; 15 niaj patroj foriris
en Egiptujon, kaj ni loĝis en Egiptujo longan tempon,
kaj la Egiptoj agis malbone kontraŭ ni kaj kontraŭ
niaj patroj; 16 kaj ni ekkriis al la Eternulo, kaj Li aŭdis
nian voĉon, kaj Li sendis anĝelon kaj elkondukis nin
el Egiptujo; kaj jen ni estas en Kadeŝ, urbo ĉe la fino
de viaj limoj; 17 permesu do al ni trairi vian landon;
ni ne iros tra kampo nek tra vinberĝardeno, kaj ni ne
trinkos akvon el la putoj; laŭ la ĉefa publika vojo ni
iros, ni ne flankiĝos dekstren nek maldekstren, ĝis ni
trapasos viajn limojn. 18 Sed Edom diris al li: Vi ne
trapasos min, alie mi eliros kun glavo renkonte al vi.
19 Kaj la Izraelidoj diris al li: Laŭ la granda vojo ni iros;
kaj se ni trinkos vian akvon, mi kaj miaj brutoj, mi
pagos pro ĝi; nenio pli, sole per miaj piedoj mi trairos.
20 Sed li diris: Ne trairu. Kaj Edom elpaŝis kontraŭ
lin kun popolo multenombra kaj kun mano forta.
21 Kaj Edom ne volis permesi al Izrael trapasi liajn
limojn; kaj Izrael iris flanke de li. 22 Kaj ili elmoviĝis
el Kadeŝ; kaj la Izraelidoj, la tuta komunumo, venis al
la monto Hor. 23 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo
kaj al Aaron sur la monto Hor, ĉe la limo de la lando
Edoma, dirante: 24 Aaron alkolektiĝu al sia popolo; ĉar
pro tio, ke vi malobeis Mian ordonon ĉe la Akvo de
Malpaco, li ne venos en la landon, kiun Mi donas al la
Izraelidoj. 25 Prenu Aaronon, kaj Eleazaron, lian filon,
kaj suririgu ilin sur la monton Hor; 26 kaj deprenu de
Aaron liajn vestojn, kaj surmetu ilin sur Eleazaron,
lian filon; kaj Aaron alkolektiĝu al sia popolo kaj
mortu tie. 27 Kaj Moseo faris, kiel ordonis la Eternulo;
kaj ili suriris sur la monton Hor antaŭ la okuloj de la
tuta komunumo. 28 Kaj Moseo deprenis de Aaron liajn
vestojn, kaj surmetis ilin sur Eleazaron, lian filon. Kaj
Aaron mortis tie sur la supro de la monto. Kaj Moseo
kaj Eleazar malsupreniris de la monto. 29 Kaj la tuta
komunumo vidis, ke Aaron mortis, kaj la tuta domo
de Izrael priploris Aaronon dum tridek tagoj.

21 Kaj la Kanaanido, la reĝo de Arad, kiu loĝis en la
Sudo, aŭdis, ke Izrael venas per la vojo de Atarim;
kaj li ekbatalis kontraŭ Izrael kaj kaptis kelkajn kiel
militkaptitojn. 2 Tiam Izrael faris sanktan promeson
al la Eternulo, kaj diris: Se Vi donos ĉi tiun popolon en
mian manon, tiam mi detruos iliajn urbojn. 3 Kaj la
Eternulo elaŭskultis la voĉon de Izrael kaj fordonis la
Kanaanidojn; kaj oni pereigis ilin kaj iliajn urbojn kaj
donis al la loko la nomon Ĥorma. 4 Kaj ili elmoviĝis
de la monto Hor laŭ la vojo al la Ruĝa Maro, por
ĉirkaŭiri la landon de Edom. Kaj senkuraĝiĝis la animo
de la popolo sur la vojo. 5 Kaj la popolo ekparolis
kontraŭ Dio kaj kontraŭ Moseo: Kial vi elkondukis nin
el Egiptujo, por ke ni mortu en la dezerto? ĉar ekzistas
nek pano nek akvo, kaj al nia animo naŭzas la mizera
nutraĵo. 6 Tiam la Eternulo sendis sur la popolon
venenajn serpentojn, kaj ili mordis la popolon, kaj
mortis multe da homoj el Izrael. 7 Kaj la popolo venis
al Moseo, kaj diris: Ni pekis, parolante kontraŭ la
Eternulo kaj kontraŭ vi; preĝu al la Eternulo, ke Li
forigu de ni la serpentojn. Kaj Moseo preĝis pri la
popolo. 8 Kaj la Eternulo diris al Moseo: Faru al vi
serpenton kupran kaj metu ĝin sur stangon; kaj ĉiu
mordita, kiu ekrigardos ĝin, restos viva. 9 Kaj Moseo
faris kupran serpenton kaj metis ĝin sur stangon; kaj
se serpento mordis iun kaj ĉi tiu ekrigardis la kupran
serpenton, li restis viva. 10 Kaj la Izraelidoj elmoviĝis,
kaj starigis sian tendaron en Obot. 11 Kaj ili elmoviĝis
el Obot, kaj starigis sian tendaron en Ije-Abarim en
la dezerto, kiu estas kontraŭ Moab, en la oriento. 12
De tie ili elmoviĝis, kaj starigis sian tendaron en la
valo de Zared. 13 De tie ili elmoviĝis, kaj starigis sian
tendaron apud tiu parto de Arnon en la dezerto, kiu
estas ekster la limoj de la Amoridoj; ĉar Arnon estas
la limo de Moab, inter Moab kaj la Amoridoj. 14 Tial
estas dirite en la Libro de la Militoj de la Eternulo:
Vaheb en Sufa, Kaj la valoj de Arnon, 15 Kaj la deklivo
de la valoj, Kiu turniĝas al la kolonio Ar Kaj apogiĝas
al la limo de Moab. 16 Kaj de tie al Beer; tio estas tiu
puto, pri kiu la Eternulo diris al Moseo: Kunvenigu la
popolon, kaj Mi donos al ili akvon. 17 Tiam kantis
Izrael ĉi tiun kanton: Leviĝu, puto, ni kantu pri ĝi;
18 Puto, kiun fosis princoj, Boris eminentuloj de la
popolo, Per la sceptro, per siaj bastonoj. Kaj el tiu

dezerto al Matana, 19 kaj el Matana al Naĥaliel, kaj
el Naĥaliel al Bamot, 20 kaj el Bamot al la valo, kiu
estas sur la kampo de Moab, ĉe la supro de Pisga,
kiu estas turnita al la dezerto. 21 Kaj Izrael sendis
senditojn al Siĥon, reĝo de la Amoridoj, por diri: 22 Mi
dezirus trairi vian landon; ni ne devojiĝos sur kampon
aŭ en vinberĝardenon, ni ne trinkos akvon el puto;
laŭ la ĉefa publika vojo ni iros, ĝis ni trapasos viajn
limojn. 23 Sed Siĥon ne permesis al Izrael trapasi liajn
limojn; kaj Siĥon kolektis sian tutan popolon kaj eliris
kontraŭ Izraelon en la dezerton kaj venis ĝis Jahac
kaj ekbatalis kontraŭ Izrael. 24 Kaj Izrael frapis lin
per la glavo, kaj ekposedis lian landon de Arnon ĝis
Jabok, ĝis la Amonidoj; ĉar forta estis la limo de la
Amonidoj. 25 Kaj Izrael prenis ĉiujn tiujn urbojn; kaj
Izrael ekloĝis en ĉiuj urboj de la Amoridoj, en Ĥeŝbon
kaj en ĉiuj ĝiaj dependantaĵoj. 26 Ĉar Ĥeŝbon estis la
urbo de Siĥon, la reĝo de la Amoridoj, kaj li militis
kontraŭ la antaŭa reĝo de Moab kaj prenis el lia mano
lian tutan landon ĝis Arnon. 27 Tial diras alegoriistoj:
Iru Ĥeŝbonon; Konstruiĝu kaj fortikiĝu la urbo de
Siĥon. 28 Ĉar fajro eliris el Ĥeŝbon, Flamo el la urbo
de Siĥon; Ĝi formanĝis Ar-Moabon, La mastrojn de
la altaĵoj de Arnon. 29 Ve al vi, Moab! Vi pereis, ho
popolo de Kemoŝ! Li faris el siaj filoj forkurintojn Kaj
el siaj filinoj kaptitinojn De la reĝo de la Amoridoj
Siĥon. 30 Ni faligis ilin; pereis Ĥeŝbon ĝis Dibon; Kaj
ni ruinigis ilin ĝis Nofaĥ, Kiu estas apud Medba. 31 Kaj
Izrael loĝis en la lando de la Amoridoj. 32 Kaj Moseo
sendis, por esplorrigardi Jazeron, kaj ili militakiris
ĝiajn vilaĝojn, kaj forpelis la Amoridojn, kiuj tie estis.
33 Kaj ili forturniĝis kaj ekiris laŭ la vojo al Baŝan.
Tiam eliris al ili renkonte Og, la reĝo de Baŝan, li kaj
lia tuta popolo, por batali ĉe Edrei. 34 Kaj la Eternulo
diris al Moseo: Ne timu lin, ĉar en vian manon Mi
fordonos lin kaj lian tutan popolon kaj lian landon,
kaj vi agos kun li, kiel vi agis kun Siĥon, la reĝo de la
Amoridoj, kiu loĝis en Ĥeŝbon. 35 Kaj ili venkobatis
lin kaj liajn filojn kaj lian tutan popolon, ĝis neniu
restis; kaj ili ekposedis lian landon.

**22** Kaj la Izraelidoj elmoviĝis, kaj haltis tendare en
la stepoj de Moab, transe de Jordan, kontraŭ
Jeriĥo. 2 Balak, filo de Cipor, vidis ĉion, kion Izrael
faris al la Amoridoj. 3 Kaj Moab tre timis tiun popolon,
ĉar ĝi estis multenombra; kaj Moab ektremis antaŭ
la Izraelidoj. 4 Kaj Moab diris al la ĉefoj de Midjan:
Nun tiu popolo formanĝos nian tutan ĉirkaŭaĵon, kiel
bovo formanĝas la herbon de la kampo. Kaj Balak, filo
de Cipor, estis reĝo de Moab en tiu tempo. 5 Kaj li
sendis senditojn al Bileam, filo de Beor, en Petoron,
kiu estis ĉe la Rivero, en la landon de sia popolo, por
voki lin, kaj diri: Jen popolo eliris el Egiptujo, jen ĝi
kovris la vizaĝon de la tero, kaj ĝi loĝas kontraŭ mi. 6
Nun venu do, malbenu al mi tiun popolon, ĉar ĝi estas
pli forta ol mi; eble tiam mi povos venkobati ĝin kaj
elpeli ĝin el la lando; ĉar mi scias, ke kiun vi benas, tiu
estas benita, kaj kiun vi malbenas, tiu estas malbenita.
7 Kaj iris la plejaĝuloj de Moab kaj la plejaĝuloj de
Midjan, havante en siaj manoj la donacojn pro la
sorĉado, kaj ili venis al Bileam kaj diris al li la vortojn
de Balak. 8 Kaj li diris al ili: Tradormu ĉi tie la nokton,
kaj mi donos al vi respondon, konforme al tio, kion
diros al mi la Eternulo. Kaj la ĉefoj de Moab restis
ĉe Bileam. 9 Kaj Dio venis al Bileam, kaj diris: Kiuj
estas tiuj viroj ĉe vi? 10 Kaj Bileam diris al Dio: Balak,
filo de Cipor, reĝo de Moab, sendis al mi, dirante:
11 Jen estas la popolo, kiu eliris el Egiptujo, kaj ĝi
kovris la vizaĝon de la tero; venu do, malbenu ĝin al
mi, eble tiam mi povos batali kontraŭ ĝi kaj forpeli
ĝin. 12 Tiam Dio diris al Bileam: Ne iru kun ili; ne
malbenu la popolon, ĉar ĝi estas benita. 13 Kaj Bileam
leviĝis matene, kaj diris al la ĉefoj de Balak: Iru en
vian landon, ĉar la Eternulo ne volas permesi al mi
iri kun vi. 14 Kaj leviĝis la ĉefoj de Moab kaj venis al
Balak, kaj diris: Bileam ne volas iri kun ni. 15 Balak
sendis plue ĉefojn, pli grandajn kaj pli eminentajn ol
tiuj. 16 Kaj ili venis al Bileam, kaj diris al li: Tiel diris
Balak, filo de Cipor: Ne rifuzu do iri al mi; 17 ĉar mi
tre honoros vin, kaj ĉion, kion vi diros al mi, mi faros;
venu do, malbenu al mi tiun popolon. 18 Sed Bileam
respondis kaj diris al la servantoj de Balak: Eĉ se Balak
donos al mi sian plenan domon da arĝento kaj oro,
mi ne povas malobei la ordonon de la Eternulo, mia
Dio, farante ion malgrandan aŭ grandan. 19 Tamen
restu ĉi tie ankaŭ vi dum la nokto, kaj mi sciiĝos,
kion plue diros al mi la Eternulo. 20 Kaj Dio venis al
Bileam en la nokto, kaj diris al li: Se tiuj viroj venis,
por voki vin, leviĝu, iru kun ili, sed faru nur tion, kion
Mi diros al vi. 21 Kaj Bileam leviĝis matene kaj selis
sian azeninon kaj iris kun la ĉefoj de Moab. 22 Kaj
ekflamis la kolero de Dio pro tio, ke li iris; kaj anĝelo
de la Eternulo stariĝis sur la vojo, por malhelpi lin. Li
rajdis sur sia azenino, kaj du liaj junuloj estis kun li.

23 Kaj la azenino ekvidis la anĝelon de la Eternulo,
starantan sur la vojo kun elingigita glavo en la mano,
kaj la azenino forturniĝis de la vojo kaj iris sur la
kampon; kaj Bileam ekbatis la azeninon, por returni
ĝin sur la vojon. 24 Tiam la anĝelo de la Eternulo
stariĝis sur la vojeto inter vinberĝardenoj, kie estis
barilo sur unu flanko kaj barilo sur la dua flanko. 25
Kaj la azenino ekvidis la anĝelon de la Eternulo, kaj
alpremis sin al la muro kaj alpremis la piedon de
Bileam al la muro; kaj li denove ĝin batis. 26 Kaj la
anĝelo de la Eternulo denove forlasis sian lokon, kaj
stariĝis sur malvasta loko, kie oni ne povas flankeniri
dekstren, nek maldekstren. 27 Kiam la azenino ekvidis
la anĝelon de la Eternulo, ĝi kuŝiĝis sub Bileam. Kaj
ekflamis la kolero de Bileam, kaj li batis la azeninon
per la bastono. 28 Tiam la Eternulo malŝlosis la buŝon
de la azenino, kaj ĝi diris al Bileam: Kion mi faris al vi,
ke vi batis min jam tri fojojn? 29 Kaj Bileam diris al la
azenino: Ĉar vi mokis min; se mi havus glavon en mia
mano, mi nun mortigus vin. 30 Kaj la azenino diris al
Bileam: Ĉu mi ne estas via azenino, sur kiu vi rajdadis
de longatempe ĝis la nuna tago? ĉu mi kutimis tiel fari
al vi? Kaj li diris: Ne. 31 Tiam la Eternulo malkovris
la okulojn de Bileam, kaj li ekvidis la anĝelon de la
Eternulo, starantan sur la vojo kun elingigita glavo en
sia mano; kaj li kliniĝis, kaj ĵetiĝis vizaĝaltere. 32 Kaj
la anĝelo de la Eternulo diris al li: Kial vi batis vian
azeninon jam tri fojojn? jen Mi eliris, por malhelpi,
ĉar malbona estas via vojo antaŭ Mi. 33 La azenino
ekvidis Min, kaj forturniĝis antaŭ Mi jam tri fojojn;
se ĝi ne forturniĝus de Mi, tiam Mi vin mortigus kaj
ĝin Mi lasus vivi. 34 Tiam Bileam diris al la anĝelo
de la Eternulo: Mi pekis, ĉar mi ne sciis, ke Vi staras
kontraŭ mi sur la vojo; nun, se tio ne plaĉas al Vi, mi
iros returne. 35 Sed la anĝelo de la Eternulo diris al
Bileam: Iru kun la viroj; sed nur tion, kion Mi diros al
vi, vi diru. Kaj Bileam iris kun la ĉefoj de Balak. 36
Kiam Balak aŭdis, ke Bileam venis, li eliris renkonte al
li ĝis tiu Moaba urbo, kiu troviĝas ĉe la limo apud
Arnon, kiu estas ĉe la fino de la limo. 37 Kaj Balak
diris al Bileam: Mi sendis ja al vi, por voki vin; kial do
vi ne iris al mi? ĉu efektive mi ne povas honori vin?
38 Sed Bileam diris al Balak: Jen mi venis al vi; tamen
ĉu mi povas ion diri al vi? kion Dio enmetos en mian
buŝon, tion mi diros. 39 Kaj Bileam iris kun Balak,
kaj ili venis al Kirjat-Ĥucot. 40 Kaj Balak buĉis bovojn
kaj ŝafojn, kaj sendis al Bileam, kaj al la ĉefoj, kiuj
estis kun li. 41 En la sekvanta mateno Balak prenis
Bileamon kaj surkondukis lin sur la altaĵojn de Baal,
kaj li ekvidis de tie la finan parton de la popolo.

23 Kaj Bileam diris al Balak: Konstruu al mi ĉi tie
sep altarojn, kaj pretigu al mi ĉi tie sep bovidojn
kaj sep virŝafojn. 2 Kaj Balak faris, kiel diris Bileam;
kaj Balak kaj Bileam oferis po unu bovido kaj po unu
virŝafo sur ĉiu altaro. 3 Kaj Bileam diris al Balak: Staru
ĉe via brulofero, kaj mi iros; eble la Eternulo venos al
mi renkonte, kaj kion Li montros al mi, tion mi diros
al vi. Kaj li iris sur la altaĵon. 4 Kaj Dio renkontiĝis al
Bileam, kaj ĉi tiu diris al Li: La sep altarojn mi pretigis,
kaj mi oferis po unu bovido kaj po unu virŝafo sur
ĉiu altaro. 5 Kaj la Eternulo enmetis vorton en la
buŝon de Bileam, kaj diris: Reiru al Balak kaj parolu
tiel. 6 Kaj li revenis al tiu, kaj jen tiu staras ĉe sia
brulofero, li kaj ĉiuj ĉefoj de Moab. 7 Kaj li komencis
sian inspiritaĵon, kaj diris: El Aram venigis min Balak,
Reĝo de Moab, el la montoj orientaj: Venu, malbenu
al mi Jakobon, Kaj venu, malbondiru kontraŭ Izrael. 8
Kiel mi tiun malbenos, kiun ne malbenas Dio? Kiel mi
tiun malbondiros, kiun ne malbondiras la Eternulo? 9
De la supro de rokoj mi vidas lin, Kaj de altaĵoj mi
rigardas lin; Jen la popolo loĝas aparte Kaj ne estas
kalkulata inter la nacioj. 10 Kiu kalkulis la polvon de
Jakob Kaj la nombron de kvarono de Izrael? Mortu
mia animo per la morto de justuloj, Kaj mia fino estu
simila al ilia! 11 Tiam Balak diris al Bileam: Kion vi
faris al mi? por malbeni miajn malamikojn mi prenis
vin, kaj jen vi ilin benas. 12 Kaj li respondis kaj diris:
Ĉu ne tion, kion la Eternulo metas en mian buŝon,
mi devas precize diri? 13 Kaj Balak diris al li: Venu
do kun mi al alia loko, de kiu vi ilin vidos; nur ilian
parton vi vidos, la tutan vi ilin ne vidos; kaj malbenu
ilin al mi de tie. 14 Kaj li prenis lin sur la kampon
de ĉirkaŭrigardantoj, sur la supron de Pisga, kaj li
konstruis sep altarojn kaj oferis po unu bovido kaj
unu virŝafo sur ĉiu altaro. 15 Kaj li diris al Balak:
Staru ĉi tie ĉe via brulofero, kaj mi iros renkonte
tien. 16 Kaj la Eternulo renkontiĝis al Bileam kaj metis
vorton en lian buŝon, kaj diris: Reiru al Balak kaj
parolu tiel. 17 Kaj li venis al li, kaj jen li staras ĉe
sia brulofero, kaj kun li la ĉefoj de Moab. Kaj Balak
diris al li: Kion parolis la Eternulo? 18 Kaj li komencis
sian inspiritaĵon, kaj diris: Leviĝu, Balak, kaj aŭskultu;
Atentu min, filo de Cipor. 19 Dio ne estas homo, ke Li

mensogus, Kaj ne homido, ke Li pentus. Ĉu Li dirus
kaj ne farus, Parolus kaj ne plenumus? 20 Jen beno
estas komisiita al mi; Li benas, kaj mi ne povas tion
ŝanĝi. 21 Li ne vidis pekon ĉe Jakob, Kaj Li ne rimarkis
malpiecon ĉe Izrael; La Eternulo, lia Dio, estas kun li,
Kaj reĝa aklamado estas ĉe li. 22 Dio, kiu elkondukis
ilin el Egiptujo, Estas por ili kiel la forto de bubalo. 23
Ĉar ne ekzistas sorĉado en Jakob, Nek aŭgurado en
Izrael; Siatempe estas dirate al Jakob kaj al Izrael, kion
faras Dio. 24 Jen la popolo stariĝas kiel leonino Kaj
leviĝas kiel leono; Ĝi ne kuŝiĝos, antaŭ ol ĝi manĝos
rabakiron Kaj antaŭ ol ĝi trinkos sangon de mortigitoj.
25 Kaj Balak diris al Bileam: Nek per malbeno malbenu
ilin, nek per beno benu ilin. 26 Sed Bileam respondis
kaj diris al Balak: Ĉu mi ne diris al vi, ke ĉion, kion
diros la Eternulo, tion mi faros? 27 Kaj Balak diris
al Bileam: Venu, mi prenos vin sur alian lokon; eble
plaĉos al Dio, kaj vi malbenos ilin al mi de tie. 28
Kaj Balak prenis Bileamon sur la supron de Peor, kiu
estas turnita al la dezerto. 29 Kaj Bileam diris al Balak:
Konstruu al mi ĉi tie sep altarojn, kaj pretigu al mi ĉi
tie sep bovidojn kaj sep virŝafojn. 30 Kaj Balak faris,
kiel diris Bileam, kaj oferis po unu bovido kaj po unu
virŝafo sur ĉiu altaro.

24 Ĉar Bileam vidis, ke al la Eternulo plaĉas beni
Izraelon, li ne iris, kiel antaŭe, por aŭguri, sed
li turnis sian vizaĝon al la dezerto. 2 Kaj Bileam
levis siajn okulojn, kaj ekvidis Izraelon, starantan
laŭ siaj triboj; kaj la spirito de Dio venis sur lin. 3
Kaj li ekparolis sian inspiritaĵon, kaj diris: Parolas
Bileam, filo de Beor, Kaj parolas viro kun malfermita
okulo; 4 Parolas tiu, kiu aŭdas la vortojn de Dio, Kaj
kiu vidas la vizion de la Plejpotenculo; Li falas, sed
malfermitaj estas liaj okuloj. 5 Kiel belaj estas viaj
tendoj, ho Jakob, Viaj loĝejoj, ho Izrael! 6 Kiel valoj
ili etendiĝas, Kiel ĝardenoj apud rivero, Kiel arboj
aloaj, plantitaj de la Eternulo, Kiel cedroj apud akvo.
7 Fluos akvo el liaj siteloj, Kaj lia semo estos ĉe multaj
akvoj; Superos Agagon lia reĝo, Kaj altiĝos lia regno. 8
Dio, kiu elkondukis lin el Egiptujo, Estas por li kiel la
forto de bubalo; Li formanĝas la popolojn, kiuj estas
malamikaj al li, Kaj iliajn ostojn li frakasas Kaj per
siaj sagoj disbatas. 9 Li genuiĝis, li kuŝiĝis, Kiel leono
kaj kiel leonino; Kiu lin levos? Viaj benantoj estas
benataj, Kaj viaj malbenantoj estas malbenataj. 10
Tiam ekflamis la kolero de Balak kontraŭ Bileam, kaj
li kunefrapis siajn manojn; kaj Balak diris al Bileam:
Por malbeni miajn malamikojn mi vokis vin, kaj vi
nun benis ilin jam tri fojojn! 11 Kaj nun foriĝu sur
vian lokon; mi intencis honori vin, sed jen la Eternulo
senigis vin je la honoro. 12 Kaj Bileam diris al Balak:
Ĉu eĉ al viaj senditoj, kiujn vi sendis al mi, mi ne
parolis jene: 13 Se Balak eĉ donus al mi sian plenan
domon da arĝento kaj oro, mi ne povus malobei la
ordonon de la Eternulo, farante bonon aŭ malbonon
laŭ mia deziro? kion diros la Eternulo, tion mi diros.
14 Kaj nun mi iras al mia popolo; venu, mi sciigos al vi,
kion faros tiu popolo al via popolo en la malproksima
venonta tempo. 15 Kaj li ekparolis sian inspiritaĵon,
kaj diris: Parolas Bileam, filo de Beor, Kaj parolas viro
kun malfermita okulo; 16 Parolas tiu, kiu aŭdas la
vortojn de Dio Kaj scias la penson de la Plejaltulo, Kaj
kiu vidas la vizion de la Plejpotenculo; Li falas, sed
malfermitaj estas liaj okuloj. 17 Mi vidas lin, sed ne
nun; Mi rigardas lin, sed ne proksime. Eliros stelo el
Jakob, Kaj leviĝos sceptro el Izrael, Detruos la randojn
de Moab Kaj frakasos ĉiujn filojn de malordo. 18 Kaj
Edom estos submetito, Kaj Seir estos submetito de
siaj malamikoj; Sed Izrael havos venkon. 19 Kaj la
reganto eliros el Jakob, Kaj li pereigos la restintojn el
la urbo. 20 Kaj li ekvidis Amalekon, kaj li ekparolis
sian inspiritaĵon, kaj diris: La unua el la popoloj estis
Amalek, Sed lia fino estos pereo. 21 Kaj li ekvidis la
Kenidojn, kaj li ekparolis sian inspiritaĵon, kaj diris:
Fortika estas via loĝejo, Kaj aranĝita sur roko estas
via nesto; 22 Sed ruinigita estos Kain, Baldaŭ Aŝur vin
kaptos. 23 Kaj li ekparolis sian inspiritaĵon, kaj diris:
Ve! kiu vivos, kiam Dio tion faros? 24 Kaj venos ŝipoj
de la lando de la Kitidoj, Kaj ili humiligos Aŝuron kaj
humiligos Eberon; Sed ankaŭ ili pereos. 25 Kaj Bileam
leviĝis, kaj foriris kaj revenis al sia loko; kaj ankaŭ
Balak iris sian vojon.

25 Kaj Izrael loĝis en Ŝitim, kaj la popolo komencis
malĉastadi kun la filinoj de Moab. 2 Kaj ili
invitadis la popolon al la oferoj de siaj dioj, kaj la
popolo manĝadis kaj kliniĝadis antaŭ iliaj dioj. 3 Kaj
Izrael aliĝis al Baal-Peor; kaj ekflamis la kolero de
la Eternulo kontraŭ Izrael. 4 Kaj la Eternulo diris al
Moseo: Prenu ĉiujn estrojn de la popolo kaj pendigu
ilin al la Eternulo kontraŭ la suno, kaj deturniĝos
de Izrael la furiozo de la kolero de la Eternulo. 5
Kaj Moseo diris al la juĝistoj de Izrael: Mortigu ĉiu

siajn homojn, kiuj aliĝis al Baal-Peor. 6 Kaj jen iu
el la Izraelidoj venis kaj alkondukis al siaj fratoj
Midjanidinon antaŭ la okuloj de Moseo kaj antaŭ
la okuloj de la tuta komunumo de Izrael, dum ili
ploris ĉe la pordo de la tabernaklo de kunveno. 7
Kiam tion vidis Pineĥas, filo de Eleazar, la filo de
la pastro Aaron, li leviĝis el inter la komunumo kaj
prenis ponardegon en sian manon. 8 Kaj li iris post
la Izraelido en la dormejon, kaj trapikis ilin ambaŭ,
la Izraelidon kaj la virinon tra ŝia ventro; kaj tiam
ĉesiĝis la punfrapado de la Izraelidoj. 9 Kaj la nombro
de la mortintoj per la punfrapado estis dudek kvar
mil. 10 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante:
11 Pineĥas, filo de Eleazar, la filo de la pastro Aaron,
deturnis Mian koleregon de la Izraelidoj, ĉar li fervoris
pri Mi inter ili, kaj Mi ne ekstermis la Izraelidojn en
Mia severeco. 12 Tial diru: Jen Mi donas al li Mian
interligon pri paco; 13 kaj ĝi estu por li kaj por lia
idaro post li interligo de eterna pastreco, pro tio, ke li
fervoris pri sia Dio kaj pekliberigis la Izraelidojn. 14
La nomo de la mortigita Izraelido, kiu estis mortigita
kune kun la Midjanidino, estis Zimri, filo de Salu, ĉefo
de patrodomo el la Simeonidoj; 15 kaj la nomo de la
mortigita Midjanidino estis Kozbi, filino de Cur, estro
de la anoj de patrodomo en Midjan. 16 Kaj la Eternulo
ekparolis al Moseo, dirante: 17 Estu malamikoj al la
Midjanidoj kaj batu ilin; 18 ĉar ili estas malamikoj
al vi per sia insido, kiun ili faris al vi per Peor, kaj
per Kozbi, la filino de la Midjana estro, ilia fratino
mortigita en la tago de la punfrapado pro Peor.

26 Kaj post la punfrapado la Eternulo ekparolis al
Moseo, kaj al Eleazar, filo de la pastro Aaron,
dirante: 2 Kalkulu la tutan komunumon de la Izraelidoj
en la aĝo de dudek jaroj kaj pli, laŭ iliaj patrodomoj,
ĉiujn militkapablajn en Izrael. 3 Kaj ekparolis al ili
Moseo kaj la pastro Eleazar sur la stepoj de Moab apud
la Jeriĥa Jordan, dirante: 4 Kalkulu la popolon en la
aĝo de dudek jaroj kaj pli, kiel la Eternulo ordonis al
Moseo kaj al la Izraelidoj, kiuj eliris el la lando Egipta.
5 Ruben, la unuenaskito de Izrael. La filoj de Ruben: de
Ĥanoĥ, la familio de la Ĥanoĥidoj; de Palu, la familio
de la Paluidoj; 6 de Ĥecron, la familio de la Ĥecronidoj;
de Karmi, la familio de la Karmiidoj. 7 Tio estas la
familioj de la Rubenidoj; kaj ilia nombro estas kvardek
tri mil sepcent tridek. 8 Kaj la filoj de Palu: Eliab. 9
Kaj la filoj de Eliab: Nemuel kaj Datan kaj Abiram;
tio estas tiuj Datan kaj Abiram, eminentuloj de la
komunumo, kiuj ribelis kontraŭ Moseo kaj Aaron en
la anaro de Koraĥ, kiam ili ribelis kontraŭ la Eternulo
10 kaj la tero malfermis sian buŝon kaj englutis ilin
kaj Koraĥon ĉe la morto de la anaro, kiam la fajro
ekstermis la ducent kvindek homojn, kaj ili fariĝis
averto. 11 Sed la filoj de Koraĥ ne mortis. 12 La filoj de
Simeon laŭ iliaj familioj: de Nemuel, la familio de la
Nemuelidoj; de Jamin, la familio de la Jaminidoj; de
Jaĥin, la familio de la Jaĥinidoj; 13 de Zeraĥ, la familio
de la Zeraĥidoj; de Ŝaul, la familio de la Ŝaulidoj.
14 Tio estas la familioj de la Simeonidoj, dudek du
mil ducent. 15 La filoj de Gad laŭ iliaj familioj: de
Cefon, la familio de la Cefonidoj; de Ĥagi, la familio
de la Ĥagiidoj; de Ŝuni, la familio de la Ŝuniidoj; 16
de Ozni, la familio de la Ozniidoj; de Eri, la familio
de la Eriidoj; 17 de Arod, la familio de la Arodidoj;
de Areli, la familio de la Areliidoj. 18 Tio estas la
familioj de la Gadidoj, laŭ ilia nombro kvardek mil
kvincent. 19 La filoj de Jehuda: Er kaj Onan; sed Er kaj
Onan mortis en la lando Kanaana. 20 Kaj la filoj de
Jehuda laŭ iliaj familioj estis: de Ŝela, la familio de la
Ŝelaidoj; de Perec, la familio de la Perecidoj; de Zeraĥ,
la familio de la Zeraĥidoj. 21 Kaj la filoj de Perec estis:
de Ĥecron, la familio de la Ĥecronidoj; de Ĥamul, la
familio de la Ĥamulidoj. 22 Tio estas la familioj de
Jehuda, laŭ ilia nombro sepdek ses mil kvincent. 23 La
filoj de Isaĥar laŭ iliaj familioj: de Tola, la familio de
la Tolaidoj; de Puva, la familio de la Puvaidoj; 24 de
Jaŝub, la familio de la Jaŝubidoj; de Ŝimron, la familio
de la Ŝimronidoj. 25 Tio estas la familioj de Isaĥar,
laŭ ilia nombro sesdek kvar mil tricent. 26 La filoj
de Zebulun laŭ iliaj familioj: de Sered, la familio de
la Seredidoj; de Elon, la familio de la Elonidoj; de
Jaĥleel, la familio de la Jaĥleelidoj. 27 Tio estas la
familioj de la Zebulunidoj, laŭ ilia nombro sesdek mil
kvincent. 28 La filoj de Jozef laŭ iliaj familioj: Manase
kaj Efraim. 29 La filoj de Manase: de Maĥir, la familio
de la Maĥiridoj; kaj de Maĥir naskiĝis Gilead; de
Gilead, la familio de la Gileadidoj. 30 Jen estas la filoj
de Gilead: de Iezer, la familio de la Iezeridoj; de Ĥelek,
la familio de la Ĥelekidoj; 31 kaj de Asriel, la familio de
la Asrielidoj; kaj de Ŝeĥem, la familio de la Ŝeĥemidoj;
32 kaj de Ŝemida, la familio de la Ŝemidaidoj; kaj de
Ĥefer, la familio de la Ĥeferidoj. 33 Kaj Celofĥad,
filo de Ĥefer, ne havis filojn, sed nur filinojn; kaj la
nomoj de la filinoj de Celofĥad estis: Maĥla kaj Noa

kaj Ĥogla kaj Milka kaj Tirca. 34 Tio estas la familioj
de Manase, laŭ ilia nombro kvindek du mil sepcent. 35
Jen estas la filoj de Efraim laŭ iliaj familioj: de Ŝutelaĥ,
la familio de la Ŝutelaĥidoj; de Beĥer, la familio de la
Beĥeridoj; de Taĥan, la familio de la Taĥanidoj. 36 Kaj
jen estas la filoj de Ŝutelaĥ: de Eran, la familio de la
Eranidoj. 37 Tio estas la familioj de la filoj de Efraim,
laŭ ilia nombro tridek du mil kvincent. Tio estas la
filoj de Jozef laŭ iliaj familioj. 38 La filoj de Benjamen
laŭ iliaj familioj: de Bela, la familio de la Belaidoj;
de Aŝbel, la familio de la Aŝbelidoj; de Aĥiram, la
familio de la Aĥiramidoj; 39 de Ŝefufam, la familio de
la Ŝefufamidoj; de Ĥufam la familio de la Ĥufamidoj.
40 Kaj la filoj de Bela estis: Ard kaj Naaman; de Ard,
la familio de la Ardidoj; de Naaman, la familio de la
Naamanidoj. 41 Tio estas la filoj de Benjamen laŭ
iliaj familioj, kaj ilia nombro estis kvardek kvin mil
sescent. 42 Jen estas la filoj de Dan laŭ iliaj familioj:
de Ŝuĥam, la familio de la Ŝuĥamidoj. Tio estas la
familioj de Dan laŭ iliaj familioj. 43 Ĉiuj familioj de
la Ŝuĥamidoj prezentis la nombron de sesdek kvar
mil kvarcent. 44 La filoj de Aŝer laŭ iliaj familioj: de
Jimna, la familio de la Jimnaidoj; de Jiŝvi, la familio de
la Jiŝviidoj; de Beria, la familio de la Beriaidoj. 45 De la
filoj de Beria: de Ĥeber, la familio de la Ĥeberidoj;
de Malkiel, la familio de la Malkielidoj. 46 Kaj la
nomo de la filino de Aŝer estis Seraĥ. 47 Tio estas la
familioj de la filoj de Aŝer, laŭ ilia nombro kvindek tri
mil kvarcent. 48 La filoj de Naftali laŭ iliaj familioj:
de Jaĥceel, la familio de la Jaĥceelidoj; de Guni, la
familio de la Guniidoj; 49 de Jecer, la familio de la
Jeceridoj; de Ŝilem la familio de la Ŝilemidoj. 50 Tio
estas la familioj de Naftali laŭ iliaj familioj, kaj ilia
nombro estis kvardek kvin mil kvarcent. 51 Tia estis
la kalkulita nombro de la Izraelidoj: sescent unu mil
sepcent tridek. 52 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo,
dirante: 53 Al tiuj estu dividita la tero kiel posedaĵo
laŭ la nombro de la nomoj. 54 Al la plinombra donu
pli grandan posedaĵon, kaj al la malplinombra donu
malpli grandan posedaĵon; al ĉiu laŭ lia nombro estu
donita lia posedaĵo. 55 Sed per loto oni dividu la teron;
laŭ la nomo de siaj patraj triboj ili ricevu posedaĵon.
56 Per la loto oni dividu al ĉiu lian posedaĵon, kiel al la
plinombraj, tiel al la malplinombraj. 57 Kaj jen estas
la kalkulitoj de Levi laŭ iliaj familioj: de Gerŝon, la
familio de la Gerŝonidoj; de Kehat, la familio de la
Kehatidoj; de Merari, la familio de la Merariidoj. 58
Jen estas la familioj de Levi: la familio de la Libniidoj,
la familio de la Ĥebronidoj, la familio de la Maĥliidoj,
la familio de la Muŝiidoj, la familio de la Koraĥidoj.
Kaj de Kehat naskiĝis Amram. 59 Kaj la nomo de
la edzino de Amram estis Joĥebed, filino de Levi,
kiu estis naskita al Levi en Egiptujo; kaj ŝi naskis al
Amram Aaronon kaj Moseon kaj ilian fratinon Mirjam.
60 Kaj al Aaron naskiĝis Nadab kaj Abihu kaj Eleazar
kaj Itamar. 61 Sed Nadab kaj Abihu mortis, kiam ili
alportis fremdan fajron antaŭ la Eternulon. 62 Kaj
la nombro de iliaj kalkulitoj estis dudek tri mil, ĉiuj
virseksuloj en la aĝo de pli ol unu monato; ĉar ili ne
estis kalkulitaj kune kun la Izraelidoj, ĉar al ili ne
estis donita posedaĵo inter la Izraelidoj. 63 Tio estas la
nombro, kiun kalkulis Moseo kaj la pastro Eleazar,
kiuj kalkulis la Izraelidojn sur la stepoj de Moab ĉe la
Jeriĥa Jordan. 64 Kaj inter ili estis neniu el tiuj, kiujn
kalkulis Moseo kaj la pastro Aaron, kiam ili kalkulis la
Izraelidojn en la dezerto Sinaj. 65 Ĉar la Eternulo diris
pri ili: Ili mortos en la dezerto. Kaj restis el ili neniu,
krom Kaleb, filo de Jefune, kaj Josuo, filo de Nun.

27 Kaj aliris la filinoj de Celofĥad, filo de Ĥefer, filo
de Gilead, filo de Maĥir, filo de Manase, el la
familioj de Manase, filo de Jozef; kaj jen estas la nomoj
de liaj filinoj: Maĥla kaj Noa kaj Ĥogla kaj Milka kaj
Tirca; 2 kaj ili stariĝis antaŭ Moseo kaj antaŭ la pastro
Eleazar kaj antaŭ la estroj kaj la tuta komunumo ĉe
la pordo de la tabernaklo de kunveno, kaj diris: 3
Nia patro mortis en la dezerto, kaj li ne estis inter
la anaro, kiu ribelis kontraŭ la Eternulo en la anaro
de Koraĥ; sed pro sia peko li mortis, kaj filojn li ne
havis. 4 Kial malaperu la nomo de nia patro el inter
lia familio, ĉar li ne havis filon? Donu al ni posedaĵon
inter la fratoj de nia patro. 5 Kaj Moseo prezentis ilian
aferon antaŭ la Eternulon. 6 Kaj la Eternulo diris al
Moseo jene: 7 Prave parolas la filinoj de Celofĥad;
efektive donu al ili heredan posedaĵon inter la fratoj
de ilia patro, kaj transirigu la posedaĵon de ilia patro
al ili. 8 Kaj al la Izraelidoj diru jene: Se iu mortos,
ne havante filon, tiam transirigu lian posedaĵon al
lia filino; 9 kaj se li ne havas filinon, tiam donu lian
posedaĵon al liaj fratoj; 10 kaj se li ne havas fratojn,
donu lian posedaĵon al la fratoj de lia patro; 11 kaj
se lia patro ne havas fratojn, donu lian posedaĵon
al lia proksima parenco el lia familio, ke li heredu
ĝin. Kaj tio estu por la Izraelidoj leĝa juro, kiel la

Eternulo ordonis al Moseo. 12 Kaj la Eternulo diris
al Moseo: Supreniru sur ĉi tiun monton Abarim, kaj
rigardu la landon, kiun Mi donis al la Izraelidoj. 13
Kaj kiam vi estos vidinta ĝin, vi alkolektiĝos al via
popolo, vi ankaŭ, kiel alkolektiĝis via frato Aaron;
14 ĉar vi malobeis Mian ordonon en la dezerto Cin,
dum la malpaco de la komunumo, ke vi montru ĉe la
akvo Mian sanktecon antaŭ iliaj okuloj — tiu Akvo
de Malpaco ĉe Kadeŝ en la dezerto Cin. 15 Kaj Moseo
ekparolis al la Eternulo, dirante: 16 La Eternulo, Dio de
la spiritoj de ĉiu karno, starigu super la komunumo
viron, 17 kiu eliradus antaŭ ili kaj kiu eniradus antaŭ
ili kaj kiu elkondukadus ilin kaj kiu enkondukadus
ilin, por ke ne estu la komunumo de la Eternulo kiel
ŝafoj, kiuj ne havas paŝtiston. 18 Kaj la Eternulo diris
al Moseo: Prenu al vi Josuon, filon de Nun, viron, kiu
havas en si spiriton, kaj metu vian manon sur lin; 19
kaj starigu lin antaŭ Eleazar, la pastro, kaj antaŭ la
tuta komunumo, kaj donu al li instrukciojn antaŭ iliaj
okuloj; 20 kaj metu sur lin parton de via majesto, por
ke aŭskultu lin la tuta komunumo de la Izraelidoj. 21
Kaj li staru antaŭ la pastro Eleazar kaj demandu lin pri
decido per la signoj de lumo antaŭ la Eternulo; laŭ lia
vorto devas eliri kaj laŭ lia vorto devas eniri li kaj ĉiuj
Izraelidoj kun li kaj la tuta komunumo. 22 Kaj Moseo
faris, kiel ordonis al li la Eternulo; kaj li prenis Josuon
kaj starigis lin antaŭ la pastro Eleazar kaj antaŭ la
tuta komunumo; 23 kaj li metis sur lin siajn manojn
kaj donis al li instrukciojn, kiel la Eternulo parolis per
Moseo.

**28** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante:
2 Ordonu al la Izraelidoj kaj diru al ili: Mian
oferon, Mian panon, Miajn fajroferojn, Mian agrablan
odoraĵon observu, por alportadi al Mi en ilia tempo.
3 Kaj diru al ili: Jen estas la fajrofero, kiun vi devas
alportadi al la Eternulo: ŝafidojn jaraĝajn sendifektajn
po du en ĉiu tago, kiel konstantan bruloferon. 4 Unu
ŝafidon oferu matene, kaj la duan ŝafidon oferu ĉirkaŭ
la vespero; 5 kaj dekonon de efo da delikata faruno
kiel farunoferon, miksitan kun kvarono de hino da
elpistita oleo. 6 Tio estas la brulofero konstanta, kia
estis farata ĉe la monto Sinaj, kiel agrabla odoraĵo,
fajrofero al la Eternulo. 7 Kaj ĝia verŝofero estu po
kvarono de hino ĉe unu ŝafido; en la sanktejo vi devas
verŝi la vinon al la Eternulo. 8 Kaj la duan ŝafidon
oferu ĉirkaŭ la vespero; kun tia farunofero, kiel
matene, kaj kun tia verŝofero faru fajroferon, agrablan
odoraĵon al la Eternulo. 9 Sed en la tago sabata du
ŝafidojn jaraĝajn sendifektajn kaj du dekonojn de efo
da delikata faruno kiel farunoferon, miksitan kun oleo,
kaj ĝian verŝoferon; 10 tio estas la brulofero de ĉiu
sabato, krom la konstanta brulofero kaj ĝia verŝofero.
11 Kaj en viaj monatkomencoj alportu bruloferon al la
Eternulo: du bovidojn kaj unu virŝafon, sep jaraĝajn
sendifektajn ŝafidojn; 12 kaj tri dekonojn de efo da
delikata faruno kiel farunoferon, miksitan kun oleo,
por ĉiu bovido, kaj du dekonojn da delikata faruno kiel
farunoferon, miksitan kun oleo, por la unu virŝafo; 13
kaj po unu dekono da delikata faruno kiel farunoferon,
miksitan kun oleo, por ĉiu ŝafido; tio estas brulofero,
agrabla odoraĵo, fajrofero al la Eternulo. 14 Kaj iliaj
verŝoferoj estu: duono de hino da vino por bovido, kaj
triono de hino por virŝafo, kaj kvarono de hino por
ŝafido. Tio estas ĉiumonata brulofero por ĉiuj monatoj
de la jaro. 15 Kaj unu virkapro, kiel pekofero al la
Eternulo, krom la konstanta brulofero, estu oferata
kune kun sia verŝofero. 16 Kaj en la unua monato,
en la dek-kvara tago de la monato, estas Pasko al la
Eternulo. 17 Kaj en la dek-kvina tago de tiu monato
estas festo; dum sep tagoj oni manĝu macojn. 18
En la unua tago estas sankta kunveno; faru nenian
servan laboron; 19 kaj alportu fajroferon, bruloferon
al la Eternulo: du bovidojn kaj unu virŝafon kaj sep
jaraĝajn ŝafidojn; sendifektaj ili estu ĉe vi; 20 kaj kiel
ilian farunoferon alportu delikatan farunon, miksitan
kun oleo, tri dekonojn por bovido kaj du dekonojn
por la virŝafo; 21 po unu dekono alportu por ĉiu el
la sep ŝafidoj; 22 kaj unu virkapron, por pekliberigi
vin. 23 Krom la matena brulofero, kiu estas konstanta
brulofero, alportu tion. 24 Tiel faru en ĉiu el la sep
tagoj; tio estas manĝaĵo, fajrofero, agrabla odoraĵo
al la Eternulo; krom la konstanta brulofero oni tion
alportu kune kun ĝia verŝofero. 25 Kaj en la sepa
tago estu ĉe vi sankta kunveno; faru nenian servan
laboron. 26 Kaj en la tago de la unuaj fruktoj, kiam
vi alportos novan farunoferon al la Eternulo en via
festo de semajnoj, estu ĉe vi sankta kunveno; faru
nenian servan laboron; 27 kaj alportu bruloferon,
kiel agrablan odoraĵon al la Eternulo: du bovidojn,
unu virŝafon, sep jaraĝajn ŝafidojn; 28 kaj kiel ilian
farunoferon delikatan farunon, miksitan kun oleo,
tri dekonojn por ĉiu bovido, du dekonojn por la unu
virŝafo; 29 po unu dekono por ĉiu el la sep ŝafidoj;

30 unu virkapron, por pekliberigi vin. 31 Krom la
konstanta brulofero kaj ĝia verŝofero alportu tion;
sendifektaj ili estu ĉe vi kaj kun siaj verŝoferoj.

**29** Kaj en la sepa monato, en la unua tago de la
monato, estu ĉe vi sankta kunveno; faru nenian
servan laboron; tago de trumpetado ĝi estu por vi.
2 Kaj alportu bruloferon, kiel agrablan odoraĵon al
la Eternulo: unu bovidon, unu virŝafon, sep jaraĝajn
ŝafidojn sendifektajn; 3 kaj ilian farunoferon: delikatan
farunon, miksitan kun oleo, tri dekonojn por la bovido,
du dekonojn por la virŝafo; 4 kaj po unu dekono por ĉiu
el la sep ŝafidoj; 5 kaj unu virkapron, kiel pekoferon,
por pekliberigi vin; 6 krom la monata brulofero kaj
ĝia farunofero kaj la konstanta brulofero kaj ĝia
farunofero; kaj iliajn verŝoferojn laŭ ilia regularo;
kiel agrablan odoraĵon, fajroferon al la Eternulo. 7
Kaj en la deka tago de tiu sepa monato estu ĉe vi
sankta kunveno; kaj premu viajn animojn; faru nenian
laboron; 8 kaj alportu bruloferon al la Eternulo,
agrablan odoraĵon: unu bovidon, unu virŝafon, sep
jaraĝajn ŝafidojn; sendifektaj ili estu ĉe vi; 9 kaj ilian
farunoferon: delikatan farunon, miksitan kun oleo,
tri dekonojn por la bovido, du dekonojn por la unu
virŝafo; 10 po unu dekono por ĉiu el la sep ŝafidoj;
11 unu virkapron, kiel pekoferon, krom la pekofero
de pekliberigo kaj la konstanta brulofero kaj ĝia
farunofero kaj iliaj verŝoferoj. 12 Kaj en la dek-kvina
tago de la sepa monato estu ĉe vi sankta kunveno;
faru nenian servan laboron, kaj festu feston al la
Eternulo dum sep tagoj; 13 kaj alportu bruloferon,
fajroferon, agrablan odoraĵon al la Eternulo: dek tri
bovidojn, du virŝafojn, dek kvar jaraĝajn ŝafidojn,
sendifektaj ili estu; 14 kaj ilian farunoferon: delikatan
farunon, miksitan kun oleo, po tri dekonoj por ĉiu
el la dek tri bovidoj, po du dekonoj por ĉiu el la
du virŝafoj; 15 kaj po unu dekono por ĉiu el la dek
kvar ŝafidoj; 16 kaj unu virkapron, kiel pekoferon,
krom la konstanta brulofero, ĝia farunofero, kaj ĝia
verŝofero. 17 Kaj en la dua tago: dek du bovidojn,
du virŝafojn, dek kvar jaraĝajn ŝafidojn sendifektajn;
18 kaj ilian farunoferon kaj iliajn verŝoferojn por
la bovidoj, por la virŝafoj, kaj por la ŝafidoj, laŭ
ilia nombro, laŭ la regularo; 19 kaj unu virkapron,
kiel pekoferon, krom la konstanta brulofero kaj ĝia
farunofero kaj iliaj verŝoferoj. 20 Kaj en la tria tago:
dek unu bovidojn, du virŝafojn, dek kvar jaraĝajn
ŝafidojn sendifektajn; 21 kaj ilian farunoferon kaj iliajn
verŝoferojn por la bovidoj, por la virŝafoj, kaj por la
ŝafidoj, laŭ ilia nombro, laŭ la regularo; 22 kaj unu
virkapron pekoferan, krom la konstanta brulofero kaj
ĝia farunofero kaj ĝia verŝofero. 23 Kaj en la kvara
tago: dek bovidojn, du virŝafojn, dek kvar jaraĝajn
ŝafidojn sendifektajn; 24 ilian farunoferon kaj iliajn
verŝoferojn por la bovidoj, por la virŝafoj, kaj por la
ŝafidoj, laŭ ilia nombro, laŭ la regularo; 25 kaj unu
virkapron pekoferan, krom la konstanta brulofero,
ĝia farunofero, kaj ĝia verŝofero. 26 Kaj en la kvina
tago: naŭ bovidojn, du virŝafojn, dek kvar jaraĝajn
ŝafidojn sendifektajn; 27 kaj ilian farunoferon kaj iliajn
verŝoferojn por la bovidoj, por la virŝafoj, kaj por la
ŝafidoj, laŭ ilia nombro, laŭ la regularo; 28 kaj unu
virkapron pekoferan, krom la konstanta brulofero
kaj ĝia farunofero kaj ĝia verŝofero. 29 Kaj en la sesa
tago: ok bovidojn, du virŝafojn, dek kvar jaraĝajn
ŝafidojn sendifektajn; 30 kaj ilian farunoferon kaj iliajn
verŝoferojn por la bovidoj, por la virŝafoj, kaj por la
ŝafidoj, laŭ ilia nombro, laŭ la regularo; 31 kaj unu
virkapron pekoferan, krom la konstanta brulofero,
ĝia farunofero, kaj ĝia verŝofero. 32 Kaj en la sepa
tago: sep bovidojn, du virŝafojn, dek kvar jaraĝajn
ŝafidojn sendifektajn; 33 kaj ilian farunoferon kaj iliajn
verŝoferojn por la bovidoj, por la virŝafoj, kaj por la
ŝafidoj, laŭ ilia nombro, laŭ la regularo; 34 kaj unu
virkapron pekoferan, krom la konstanta brulofero, ĝia
farunofero, kaj ĝia verŝofero. 35 En la oka tago estu ĉe
vi sankta kunveno; faru nenian servan laboron; 36 kaj
alportu bruloferon, fajroferon, agrablan odoraĵon al
la Eternulo; unu bovidon, unu virŝafon, sep jaraĝajn
ŝafidojn sendifektajn; 37 ilian farunoferon kaj iliajn
verŝoferojn por la bovido, por la virŝafo, kaj por la
ŝafidoj, laŭ ilia nombro, laŭ la regularo; 38 kaj unu
virkapron pekoferan, krom la konstanta brulofero
kaj ĝia farunofero kaj ĝia verŝofero. 39 Tion faru al la
Eternulo en viaj festoj, krom viaj sanktaj promesitaĵoj
kaj viaj propravolaj donacoj, viaj bruloferoj kaj viaj
farunoferoj kaj viaj verŝoferoj kaj viaj pacoferoj. 40
Kaj Moseo raportis al la Izraelidoj konforme al ĉio,
kion la Eternulo ordonis al Moseo.

**30** Kaj Moseo ekparolis al la tribestroj de la Izraelidoj,
dirante: Jen kion ordonis la Eternulo: 2 Se iu
faros sanktan promeson al la Eternulo aŭ ĵuros ĵuron,
ligante sian animon, li ne rompu sian vorton, sed

konforme al ĉio, kio eliris el lia buŝo, li faru. 3 Kaj
se virino faros sanktan promeson al la Eternulo aŭ
ligos sin en la domo de sia patro, en sia juneco, 4 kaj
ŝia patro aŭdos ŝian promeson, kaj la ligon, kiun ŝi
metas sur sian animon, kaj ŝia patro silentos pri tio;
tiam valoras ĉiuj ŝiaj promesoj, kaj ĉiu ligo, kiun ŝi
metis sur sian animon, valoras. 5 Sed se ŝia patro
malpermesos al ŝi en la tago, kiam li aŭdis, tiam ĉiuj
ŝiaj promesoj kaj ĉiuj ŝiaj ligoj, per kiuj ŝi ligis sian
animon, ne valoras; kaj la Eternulo pardonos al ŝi, ĉar
ŝia patro malpermesis al ŝi. 6 Se ŝi fariĝos edzino, kaj
sur ŝi estos ŝiaj promesoj, aŭ vorto, kiu elglitis el ŝia
buŝo kaj ligis ŝian animon, 7 kaj ŝia edzo aŭdos, kaj li
silentos en la tago, kiam li aŭdis; tiam valoras ŝiaj
promesoj, kaj ŝiaj ligoj, per kiuj ŝi ligis sian animon,
valoras. 8 Sed se en la tago, kiam ŝia edzo aŭdis, li
malpermesas al ŝi, tiam li neniigas ŝian promeson, kiu
estas sur ŝi, kaj tion, kio elglitis el ŝia buŝo kaj per kio
ŝi ligis sian animon; kaj la Eternulo pardonos al ŝi.
9 La promeso de vidvino kaj de eksedzino, ĉio, per
kio ŝi ligis sian animon, valoras sur ŝi. 10 Se virino
en la domo de sia edzo faris sanktan promeson aŭ
per ĵuro metis ligon sur sian animon, 11 kaj ŝia edzo
aŭdis kaj silentis, ne malpermesis al ŝi; tiam valoras
ĉiuj ŝiaj promesoj, kaj ĉiu ligo, kiun ŝi metis sur sian
animon, valoras. 12 Sed se ŝia edzo neniigis ilin en la
tago, kiam li aŭdis; tiam ĉio, kio eliris el ŝia buŝo, ŝiaj
promesoj kaj la ligoj de ŝia animo, ne valoras: ŝia edzo
ilin neniigis; kaj la Eternulo pardonos al ŝi. 13 Ĉiun
promeson kaj ĉiun ligiĝon per ĵuro fari premon al
sia animo ŝia edzo povas valorigi aŭ ŝia edzo povas
neniigi. 14 Se ŝia edzo silentis tagon por tago, tiam li
valorigas ĉiujn ŝiajn promesojn, aŭ ĉiujn ligiĝojn, kiuj
estas sur ŝi, li valorigas; ĉar li silentis en la tago, kiam
li aŭdis. 15 Kaj se li neniigis ilin, post kiam li aŭdis,
tiam li prenis sur sin ŝian kulpon. 16 Tio estas la leĝoj,
kiujn la Eternulo donis al Moseo pri la rilatoj inter
edzo kaj lia edzino, inter patro kaj lia filino en ŝia
juneco en la domo de ŝia patro.

**31** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2
Faru venĝon pro la Izraelidoj sur la Midjanidoj;
kaj poste alkolektiĝu al via popolo. 3 Kaj Moseo
ekparolis al la popolo, dirante: Armu inter vi virojn
por milito, ke ili iru kontraŭ Midjan, por fari venĝon
de la Eternulo sur Midjan. 4 Po mil el tribo, el ĉiuj
triboj de Izrael, sendu en militon. 5 Kaj oni eligis el
la miloj de la Izraelidoj, po mil el ĉiu tribo, dek du
mil armitojn por milito. 6 Kaj Moseo sendis ilin, po
mil el tribo, en militon, ilin kaj Pineĥason, filon de
la pastro Eleazar, en militon, kaj la sanktaj vazoj kaj
alarmaj trumpetoj estis en lia mano. 7 Kaj ili militis
kontraŭ Midjan, kiel la Eternulo ordonis al Moseo,
kaj ili mortigis ĉiujn virseksulojn. 8 Kaj la reĝojn
de Midjan ili mortigis inter la aliaj mortigitoj: Evin,
Rekemon, Curon, Ĥuron, kaj Reban, la kvin reĝojn de
Midjan, kaj Bileamon, filon de Beor, ili mortigis per
glavo. 9 Kaj la Izraelidoj prenis en malliberecon la
virinojn Midjanajn kaj iliajn infanojn; kaj ĉiujn iliajn
brutojn kaj ilian tutan posedaĵon kaj havon ili rabis. 10
Kaj ĉiujn iliajn urbojn en iliaj lokoj de loĝado kaj ĉiujn
iliajn kastelojn ili forbruligis per fajro. 11 Kaj ili prenis
la tutan kaptitaĵon kaj rabitaĵon, kiel la homojn, tiel
ankaŭ la brutojn. 12 Kaj ili venigis al Moseo kaj al la
pastro Eleazar kaj al la komunumo de la Izraelidoj
la kaptitojn kaj la prenitaĵon kaj la rabitaĵon en la
tendaron sur la stepoj de Moab apud la Jeriĥa Jordan.
13 Kaj eliris Moseo kaj la pastro Eleazar kaj ĉiuj estroj
de la komunumo renkonte al ili ekster la tendaron. 14
Kaj Moseo ekkoleris kontraŭ la militestroj, la milestroj
kaj centestroj, kiuj venis el la milito. 15 Kaj Moseo
diris al ili: Vi lasis vivi ĉiujn virinojn! 16 Jen ili estis ja
por la Izraelidoj, laŭ la vortoj de Bileam, instigo por
deturniĝi de la Eternulo al Peor; kaj pro tio estis ja la
punfrapado en la komunumo de la Eternulo. 17 Kaj
nun mortigu ĉiun virseksan infanon; kaj ĉiun virinon,
kiu ekkonis viron sur kuŝejo de viro, mortigu. 18 Sed
ĉiun infanon virinseksan, kiu ne ekkonis kuŝejon de
viro, lasu viva por vi. 19 Kaj vi restu ekster la tendaro
dum sep tagoj; ĉiu el vi kaj viaj kaptitoj, kiu mortigis
homon, kaj ĉiu, kiu ektuŝis mortigiton, pekpurigu sin
en la tria tago kaj en la sepa tago. 20 Kaj ĉiun veston
kaj ĉiun objekton el felo kaj ĉion faritan el kapra
lano kaj ĉiun lignan vazon pekpurigu. 21 Kaj la pastro
Eleazar diris al la militistoj, kiuj iris en la militon: Tio
estas la leĝa instrukcio, kiun la Eternulo ordonis al
Moseo: 22 Nur oron, arĝenton, kupron, feron, stanon,
kaj plumbon, 23 ĉion, kio povas iri en fajron, trairigu
tra fajro, kaj ĝi estos pura, tamen per puriga akvo oni
ĝin pekpurigu; ĉion, kio ne povas iri en fajron, trairigu
tra akvo. 24 Kaj lavu viajn vestojn en la sepa tago kaj
fariĝu puraj, kaj poste vi povas veni en la tendaron. 25
Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 26 Kalkulu
la kvanton de la prenita kaptitaĵo, kiel de la homoj,

tiel ankaŭ de la brutoj, vi kaj la pastro Eleazar kaj la
estroj de la familioj de la komunumo. 27 Kaj dividu la
prenitaĵon po duono inter tiuj, kiuj partoprenis en la
milito kaj iris batali, kaj inter la tuta komunumo. 28
Kaj prenu imposton por la Eternulo de la militistoj,
kiuj iris batali, po unu animo el kvincent, kiel el la
homoj, tiel el la bovoj kaj el la azenoj kaj el la ŝafoj. 29
Prenu tion el ilia duono, kaj donu al la pastro Eleazar,
kiel oferdonon por la Eternulo. 30 Kaj el la duono,
apartenanta al la Izraelidoj, prenu po unu kaptito el
kvindek, kiel el la homoj, tiel ankaŭ el la bovoj, el la
azenoj, kaj el la ŝafoj, el ĉiuj brutoj, kaj donu ilin al la
Levidoj, kiuj plenumas la oficojn en la tabernaklo de
la Eternulo. 31 Kaj faris Moseo kaj la pastro Eleazar,
kiel la Eternulo ordonis al Moseo. 32 Kaj la kvanto de
la kaptitaĵo, krom la rabitaĵo, kiun rabis la militistoj,
estis: da ŝafoj sescent sepdek kvin mil; 33 kaj da bovoj
sepdek du mil; 34 kaj da azenoj sesdek unu mil; 35 kaj
da homoj, el virinoj, kiuj ne ekkonis kuŝejon de viro,
la nombro de ĉiuj estis tridek du mil. 36 La duono,
la parto de tiuj, kiuj iris en la militon, estis: da ŝafoj
tricent tridek sep mil kvincent; 37 kaj la tributo por
la Eternulo estis el la ŝafoj sescent sepdek kvin; 38
kaj da bovoj estis tridek ses mil, kaj el ili la tributo al
la Eternulo sepdek du; 39 kaj da azenoj estis tridek
mil kvincent, kaj el ili la tributo al la Eternulo sesdek
unu; 40 kaj da homoj estis dek ses mil, kaj el ili la
tributo por la Eternulo tridek du animoj. 41 Kaj Moseo
donis la tributon, la oferdonon por la Eternulo, al
la pastro Eleazar, kiel la Eternulo ordonis al Moseo.
42 Kaj el la duono, apartenanta al la Izraelidoj, kiun
apartigis Moseo de la viroj, kiuj militis 43 (kaj la
duono, apartenanta al la komunumo, estis: da ŝafoj
tricent tridek sep mil kvincent, 44 kaj da bovoj tridek
ses mil, 45 kaj da azenoj tridek mil kvincent, 46 kaj
da homoj dek ses mil) — 47 Kaj Moseo prenis el la
duono, apartenanta al la Izraelidoj, unu prenitaĵon el
kvindek, kiel el la homoj, tiel ankaŭ el la brutoj, kaj li
donis ilin al la Levidoj, kiuj plenumas oficojn en la
tabernaklo de la Eternulo, kiel la Eternulo ordonis
al Moseo. 48 Kaj aliris al Moseo la estroj de la miloj
da militistoj, la milestroj kaj la centestroj; 49 kaj ili
diris al Moseo: Viaj servantoj kalkulis la militistojn,
kiuj estis komisiitaj al ni, kaj mankas el ili neniu; 50
tial ni alportas oferon al la Eternulo, kion ĉiu el ni
trovis, orajn vazojn, ĉenetojn, braceletojn, ringojn,
orelornamojn, kaj kolringojn, por pekliberigi niajn
animojn antaŭ la Eternulo. 51 Kaj Moseo kaj la pastro
Eleazar prenis de ili la oron en la formo de diversaj
objektoj. 52 Kaj la kvanto de la tuta oro oferdona, kiun
ili oferdonis al la Eternulo, estis dek ses mil sepcent
kvindek sikloj de la milestroj kaj de la centestroj.
53 Ĉar la militistoj rabis ĉiu por si.) 54 Kaj Moseo
kaj la pastro Eleazar prenis la oron de la milestroj
kaj centestroj, kaj alportis ĝin en la tabernaklon de
kunveno, kiel memorigaĵon de la Izraelidoj antaŭ la
Eternulo.

32 La filoj de Ruben kaj la filoj de Gad havis tre
multe da brutaroj; kaj ili vidis, ke la lando Jazer
kaj la lando Gilead estas lokoj bonaj por brutaroj.
2 Kaj venis la filoj de Gad kaj la filoj de Ruben, kaj
diris al Moseo kaj al la pastro Eleazar kaj al la estroj
de la komunumo jene: 3 Atarot kaj Dibon kaj Jazer
kaj Nimra kaj Ĥeŝbon kaj Eleale kaj Sibma kaj Nebo
kaj Beon — 4 tiu lando, kiun la Eternulo venkobatis
antaŭ la komunumo de Izrael — estas lando bona
por brutaroj, kaj viaj servantoj havas brutarojn. 5 Kaj
ili diris: Se vi estas favoraj al ni, tiam tiu lando estu
donata al viaj servantoj kiel posedaĵo; ne irigu nin
trans Jordanon. 6 Kaj Moseo diris al la filoj de Gad kaj
al la filoj de Ruben: Ĉu viaj fratoj iru en la militon kaj
vi sidos ĉi tie? 7 Kaj kial vi deklinas la koron de la
Izraelidoj de la transiro en la landon, kiun donas al ili
la Eternulo? 8 Tiel agis viaj patroj, kiam mi sendis ilin
el Kadeŝ-Barnea, por rigardi la landon. 9 Ili iris ĝis la
valo Eŝkol kaj vidis la landon, kaj deklinis la koron de
la Izraelidoj, ke ili ne iru en la landon, kiun donas al
ili la Eternulo. 10 Kaj ekflamis en tiu tago la kolero de
la Eternulo, kaj Li ĵuris, dirante: 11 Tiuj homoj, kiuj
eliris el Egiptujo, en la aĝo de dudek jaroj kaj pli, ne
vidos la landon, pri kiu Mi ĵuris al Abraham, al Isaak,
kaj al Jakob; ĉar ili ne sekvis Min; 12 krom Kaleb, filo
de Jefune, la Kenizido, kaj Josuo, filo de Nun, ĉar ili
sekvis Min. 13 Kaj ekflamis la kolero de la Eternulo
kontraŭ Izrael, kaj Li igis ilin vagadi en la dezerto
dum kvardek jaroj, ĝis mortis la tuta generacio, kiu
faris malbonon en la okuloj de la Eternulo. 14 Kaj
jen vi leviĝis anstataŭ viaj patroj, nova generacio da
pekuloj, por ankoraŭ plifortigi la flaman koleron de la
Eternulo kontraŭ Izrael. 15 Se vi deturniĝos de Li, tiam
Li denove restigos ilin en la dezerto; kaj vi pereigos
tiun tutan popolon. 16 Kaj ili aliris al li, kaj diris:
Baraĵojn por ŝafoj ni konstruos ĉi tie por niaj brutaroj

kaj urbojn por niaj infanoj; 17 sed ni mem rapidos
armitaj antaŭ la Izraelidoj, ĝis ni alkondukos ilin al
iliaj lokoj; kaj niaj infanoj loĝos en la fortikigitaj urboj
pro la loĝantoj de la lando. 18 Ni ne revenos al niaj
domoj, ĝis la Izraelidoj ekposedos ĉiu sian posedaĵon.
19 Ni ne prenos kun ili posedaĵon transe de Jordan kaj
plue; ĉar ni ricevos nian posedaĵon sur ĉi tiu orienta
flanko de Jordan. 20 Kaj Moseo diris al ili: Se vi tion
faros, se vi iros armitaj antaŭ la Eternulo en la militon,
21 kaj ĉiu el vi armita transiros Jordanon antaŭ la
Eternulo, ĝis Li forpelos Siajn malamikojn antaŭ Si,
22 kaj la lando estos militakirita antaŭ la Eternulo,
tiam vi poste revenos, kaj vi estos senkulpaj antaŭ la
Eternulo kaj antaŭ Izrael, kaj ĉi tiu lando estos via
posedaĵo antaŭ la Eternulo. 23 Sed se vi ne agos tiel,
tiam vi pekos antaŭ la Eternulo, kaj vi suferos vian
punon, kiu trafos vin. 24 Konstruu al vi urbojn por
viaj infanoj kaj baraĵojn por viaj ŝafoj; kaj faru tion,
kio eliris el via buŝo. 25 Kaj la filoj de Gad kaj la filoj
de Ruben diris al Moseo jene: Viaj servantoj faros, kiel
nia sinjoro ordonas. 26 Niaj infanoj, niaj edzinoj, niaj
brutaroj, kaj ĉiuj niaj brutoj estos ĉi tie, en la urboj de
Gilead; 27 sed viaj servantoj, ĉiuj armitaj militiste, iros
antaŭ la Eternulo en la militon, kiel nia sinjoro diras.
28 Kaj Moseo ordonis pri ili al la pastro Eleazar, kaj al
Josuo, filo de Nun, kaj al la estroj de la triboj de la
Izraelidoj; 29 kaj Moseo diris al ili: Se la filoj de Gad
kaj la filoj de Ruben transiros kun vi Jordanon, ĉiuj
armitaj por la milito antaŭ la Eternulo, kaj la lando
estos militakirita antaŭ vi, tiam donu al ili la landon
Gilead kiel posedaĵon; 30 sed se ili ne transiros kun
vi armitaj, tiam ili ricevos posedaĵon inter vi en la
lando Kanaana. 31 Kaj la filoj de Gad kaj la filoj de
Ruben respondis, dirante: Kion la Eternulo diris al viaj
servantoj, tion ni faros. 32 Ni transiros armitaj antaŭ
la Eternulo en la landon Kanaanan, kaj nia hereda
posedaĵo estos sur ĉi tiu flanko de Jordan. 33 Kaj Moseo
donis al ili, al la filoj de Gad kaj al la filoj de Ruben,
kaj al duono de la tribo de Manase, filo de Jozef, la
regnon de Siĥon, reĝo de la Amoridoj, kaj la regnon
de Og, reĝo de Baŝan, la landon kun ĝiaj urboj laŭ la
limoj de la urboj de la lando ĉirkaŭe. 34 Kaj la filoj de
Gad rekonstruis Dibonon kaj Ataroton kaj Aroeron
35 kaj Atrot-Ŝofanon kaj Jazeron kaj Jogbehan 36 kaj
Bet-Nimran kaj Bet-Haranon, fortikigitajn urbojn, kaj
baraĵojn por ŝafoj. 37 Kaj la filoj de Ruben rekonstruis
Ĥeŝbonon kaj Elealen kaj Kirjataimon, 38 kaj Nebon
kaj Baal-Meonon, kies nomojn oni ŝanĝis, kaj Sibman;
kaj ili donis nomojn al la urboj, kiujn ili konstruis. 39
Kaj la filoj de Maĥir, filo de Manase, iris Gileadon kaj
militakiris ĝin, kaj forpelis la Amoridojn, kiuj estis
tie. 40 Kaj Moseo donis Gileadon al Maĥir, filo de
Manase, kaj tiu ekloĝis tie. 41 Kaj Jair, filo de Manase,
iris kaj militakiris iliajn vilaĝojn, kaj li donis al ili la
nomon Vilaĝoj de Jair. 42 Kaj Nobaĥ iris kaj militakiris
Kenaton kaj ĝiajn vilaĝojn, kaj donis al ĝi la nomon
Nobaĥ, laŭ sia nomo.

33 Jen estas la iroj de la Izraelidoj, per kiuj ili eliris
el la lando Egipta, laŭ siaj taĉmentoj, sub la
kondukado de Moseo kaj Aaron. 2 Kaj Moseo priskribis
iliajn lokojn de eliro, laŭ ilia irado, konforme al la
ordono de la Eternulo; kaj jen estas ilia irado laŭ iliaj
lokoj de eliro: 3 el Rameses ili eliris en la unua monato,
en la dek-kvina tago de la unua monato; en la dua
tago de Pasko la Izraelidoj eliris kun forta mano antaŭ
la okuloj de la tuta Egiptujo. 4 Dume la Egiptoj estis
enterigantaj ĉiujn unuenaskitojn, kiujn la Eternulo
mortigis inter ili; kaj super iliaj dioj la Eternulo faris
juĝon. 5 Kaj la Izraelidoj eliris el Rameses kaj haltis
tendare en Sukot. 6 Kaj ili eliris el Sukot, kaj haltis
tendare en Etam, kiu estas ĉe la rando de la dezerto. 7
Kaj ili eliris el Etam, kaj turnis sin al Pi-Haĥirot, kiu
estas kontraŭ Baal-Cefon, kaj ili haltis tendare antaŭ
Migdol. 8 Kaj ili eliris el Pi-Haĥirot kaj transiris meze
de la maro en la dezerton, kaj ili iris tritagan vojon
tra la dezerto Etam kaj haltis tendare en Mara. 9 Kaj
ili eliris el Mara kaj venis Elimon; en Elim estis dek
du fontoj de akvo kaj sepdek daktilaj palmoj, kaj ili
haltis tie tendare. 10 Kaj ili eliris el Elim kaj haltis
tendare ĉe la Ruĝa Maro. 11 Kaj ili foriris de la Ruĝa
Maro kaj haltis tendare en la dezerto Sin. 12 Kaj ili
foriris el la dezerto Sin kaj haltis tendare en Dofka.
13 Kaj ili eliris el Dofka kaj haltis tendare en Aluŝ.
14 Kaj ili eliris el Aluŝ kaj haltis tendare en Refidim,
kaj tie ne estis akvo por la popolo por trinki. 15 Kaj
ili eliris el Refidim kaj haltis en la dezerto Sinaj. 16
Kaj ili eliris el la dezerto Sinaj kaj haltis tendare en
Kibrot-Hataava. 17 Kaj ili eliris el Kibrot-Hataava kaj
haltis tendare en Ĥacerot. 18 Kaj ili eliris el Ĥacerot
kaj haltis tendare en Ritma. 19 Kaj ili eliris el Ritma
kaj haltis tendare en Rimon-Perec. 20 Kaj ili eliris el
Rimon-Perec kaj haltis tendare en Libna. 21 Kaj ili
eliris el Libna kaj haltis tendare en Risa. 22 Kaj ili

eliris el Risa kaj haltis tendare en Kehelata. 23 Kaj ili
eliris el Kehelata kaj haltis tendare ĉe la monto Ŝefer.
24 Kaj ili foriris de la monto Ŝefer kaj haltis tendare en
Ĥarada. 25 Kaj ili eliris el Ĥarada kaj haltis tendare
en Makhelot. 26 Kaj ili eliris el Makhelot kaj haltis
tendare en Taĥat. 27 Kaj ili eliris el Taĥat kaj haltis
tendare en Teraĥ. 28 Kaj ili eliris el Teraĥ kaj haltis
tendare en Mitka. 29 Kaj ili eliris el Mitka kaj haltis
tendare en Ĥaŝmona. 30 Kaj ili eliris el Ĥaŝmona kaj
haltis tendare en Moserot. 31 Kaj ili eliris el Moserot
kaj haltis tendare en Bene-Jaakan. 32 Kaj ili eliris el
Bene-Jaakan kaj haltis tendare en Ĥor-Hagidgad. 33
Kaj ili eliris el Ĥor-Hagidgad kaj haltis tendare en
Jotbata. 34 Kaj ili eliris el Jotbata kaj haltis tendare en
Abrona. 35 Kaj ili eliris el Abrona kaj haltis tendare en
Ecjon-Geber. 36 Kaj ili eliris el Ecjon-Geber kaj haltis
tendare en la dezerto Cin (tio estas Kadeŝ). 37 Kaj ili
eliris el Kadeŝ, kaj haltis tendare ĉe la monto Hor,
ĉe la rando de la lando de Edom. 38 Kaj la pastro
Aaron supreniris sur la monton Hor laŭ la ordono de
la Eternulo, kaj mortis tie en la jaro kvardeka post la
eliro de la Izraelidoj el la lando Egipta, en la kvina
monato, en la unua tago de la monato. 39 Kaj Aaron
havis la aĝon de cent dudek tri jaroj, kiam li mortis
sur la monto Hor. 40 Kaj la Kanaanido, la reĝo de
Arad, kiu loĝis en la sudo de la lando Kanaana, aŭdis,
ke venas la Izraelidoj. 41 Kaj ili foriris de la monto
Hor kaj haltis tendare en Calmona. 42 Kaj ili eliris
el Calmona kaj haltis tendare en Punon. 43 Kaj ili
eliris el Punon kaj haltis tendare en Obot. 44 Kaj ili
eliris el Obot, kaj haltis tendare en Ije-Abarim, ĉe la
limo de Moab. 45 Kaj ili eliris el Ije-Abarim kaj haltis
tendare en Dibon-Gad. 46 Kaj ili eliris el Dibon-Gad
kaj haltis tendare en Almon-Diblataim. 47 Kaj ili eliris
el Almon-Diblataim, kaj haltis tendare ĉe la montoj
Abarim, antaŭ Nebo. 48 Kaj ili foriris de la montoj
Abarim, kaj haltis tendare en la stepoj de Moab, ĉe
la Jeriĥa Jordan. 49 Kaj ili aranĝis sian tendaron ĉe
Jordan, de Bet-Jeŝimot ĝis Abel-Ŝitim, en la stepoj
de Moab. 50 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo en
la stepoj de Moab ĉe la Jeriĥa Jordan, dirante: 51
Parolu al la Izraelidoj, kaj diru al ili: Kiam vi transiros
Jordanon en la landon Kanaanan, 52 tiam forpelu de
antaŭ vi ĉiujn loĝantojn de la lando, kaj detruu ĉiujn
iliajn figurojn, kaj ĉiujn iliajn fanditajn bildojn detruu,
kaj ĉiujn iliajn altaĵojn ekstermu; 53 kaj ekposedu la
landon kaj ekloĝu en ĝi, ĉar al vi Mi donas la landon,
ke vi posedu ĝin. 54 Kaj dispartigu al vi la landon per
loto konforme al viaj familioj; al la plinombra donu
pli grandan posedaĵon, kaj al la malplinombra donu
malpli grandan posedaĵon; kie al iu trafos la loto, tie
estu lia posedaĵo; laŭ la triboj de viaj patroj prenu al
vi posedaĵojn. 55 Sed se vi ne forpelos de antaŭ vi la
loĝantojn de la lando, tiam tiuj, kiujn vi restigos el ili,
estos dornoj por viaj okuloj kaj pikiloj por viaj flankoj,
kaj ili premos vin en la lando, en kiu vi loĝos. 56 Kaj
tiam tion, kion Mi intencis fari al ili, Mi faros al vi.

34 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 2
Ordonu al la Izraelidoj, kaj diru al ili: Kiam vi
venos en la landon Kanaanan, tiu lando fariĝu via
posedaĵo, la lando Kanaana laŭ siaj limoj. 3 La rando
suda estu por vi de la dezerto Cin, apud Edom, kaj
la suda limo estu por vi de la fino de la Sala Maro
oriente; 4 kaj la suda limo turniĝos ĉe vi al la altaĵo
Akrabim kaj iros tra Cin, kaj ĝiaj elstaraĵoj iros suden
ĝis Kadeŝ-Barnea kaj atingos ĝis Ĥacar-Adar kaj pasos
tra Acmon; 5 kaj de Acmon la limo turniĝos al la
Egipta torento, kaj ĝiaj elstaraĵoj estos ĝis la maro. 6
Kaj por okcidenta limo estu por vi la Granda Maro
kiel limo; tio estos por vi la limo okcidenta. 7 Kaj tia
estu por vi la limo norda: de la Granda Maro vi tiros
ĝin al vi ĝis la monto Hor; 8 de la monto Hor tiru ĝin
ĝis Ĥamat, kaj la elstaraĵoj de la limo iros al Cedad; 9
kaj la limo iros ĝis Zifron, kaj ĝiaj elstaraĵoj iros ĝis
Ĥacar-Enan; tio estu por vi la limo norda. 10 Kaj la
limon orientan vi tiros al vi de Ĥacar-Enan ĝis Ŝefam;
11 de Ŝefam la limo iros ĝis Ribla, orienten de Ain;
poste la limo iros malsupren kaj tuŝos la bordon de la
maro Kineret oriente; 12 kaj pluen la limo iros ĝis
Jordan, kaj ĝiaj elstaraĵoj estos ĝis la Sala Maro. Tia
estos via lando laŭ ĝiaj limoj ĉirkaŭe. 13 Kaj Moseo
ordonis al la Izraelidoj, dirante: Tio estas la lando,
kiun vi dividos inter vi per loto kaj kiun la Eternulo
ordonis doni al naŭ triboj kaj al duontribo; 14 ĉar la
tribo de la Rubenidoj laŭ iliaj patrodomoj, kaj la tribo
de la Gadidoj laŭ iliaj patrodomoj, kaj duono de la
tribo de la Manaseidoj prenis sian parton; 15 la du
triboj kaj la duontribo prenis sian parton transe de la
Jeriĥa Jordan, oriente, sur la flanko de sunleviĝo. 16
Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: 17 Jen
estas la nomoj de la viroj, kiuj disdividos inter vi la
landon: Eleazar, la pastro, kaj Josuo, filo de Nun. 18
Kaj po unu estro el ĉiu tribo prenu por la dividado de

la lando. 19 Kaj jen estas la nomoj de la viroj: por la
tribo de Jehuda, Kaleb, file de Jefune; 20 kaj por la
tribo de la Simeonidoj, Ŝemuel, filo de Amihud; 21 por
la tribo de Benjamen, Elidad, filo de Kislon; 22 kaj por
la tribo de la Danidoj, la estro Buki, filo de Jogli; 23
por la filoj de Jozef: por la tribo de la Manaseidoj,
la estro Ĥaniel, filo de Efod, 24 kaj por la tribo de la
Efraimidoj, la estro Kemuel, filo de Ŝiftan; 25 kaj por
la tribo de la Zebulunidoj, la estro Elicafan, filo de
Parnaĥ; 26 kaj por la tribo de la Isaĥaridoj, la estro
Paltiel, filo de Azan; 27 kaj por la tribo de la Aŝeridoj,
la estro Aĥihud, filo de Ŝelomi; 28 kaj por la tribo de
la Naftaliidoj, la estro Pedahel, filo de Amihud. 29 Tio
estas tiuj, al kiuj la Eternulo ordonis, ke ili disdonu la
posedaĵojn al la Izraelidoj en la lando Kanaana.

**35** Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo en la stepoj
de Moab ĉe la Jeriĥa Jordan, dirante: 2 Ordonu al
la Izraelidoj, ke ili donu al la Levidoj el siaj posedaĵoj
urbojn por loĝi; ankaŭ la kampojn ĉirkaŭ tiuj urboj
donu al la Levidoj. 3 Kaj la urboj estos por ili por loĝi,
kaj la kampoj estos por iliaj brutoj kaj por ilia havo
kaj por ĉiuj iliaj bezonoj de la vivo. 4 Kaj la kampoj de
tiuj urboj, kiujn vi donos al la Levidoj, devas etendiĝi
mil ulnojn ekster la muroj de la urboj ĉirkaŭe. 5 Kaj
mezuru ekster la urbo sur la orienta flanko du mil
ulnojn kaj sur la suda flanko du mil ulnojn kaj sur la
okcidenta flanko du mil ulnojn kaj sur la norda flanko
du mil ulnojn, kaj la urbo estos en la mezo; tiaj estu
por ili la kampoj de la urboj. 6 Kaj el la urboj, kiujn
vi donos al la Levidoj, estos ses urboj de rifuĝo, en
kiujn vi al mortiginto permesos forkuri; kaj krom tiuj
donu kvardek du urbojn. 7 La nombro de ĉiuj urboj,
kiujn vi devas doni al la Levidoj, estas kvardek ok
urboj kune kun iliaj kampoj. 8 La urbojn, kiujn vi
donos el la posedaĵoj de la Izraelidoj, de la plimultaj
prenu pli multe kaj de la malplimultaj prenu malpli
multe; ĉiu konforme al sia posedaĵo, kiun li ricevos,
devas doni el siaj urboj al la Levidoj. 9 Kaj la Eternulo
ekparolis al Moseo, dirante: 10 Parolu al la Izraelidoj,
kaj diru al ili: Kiam vi transiros Jordanon en la landon
Kanaanan, 11 tiam elektu al vi urbojn, kiuj estu ĉe vi
urboj de rifuĝo, kien povas forkuri mortiginto, kiu
mortigis homon senintence. 12 Kaj tiuj urboj estos
ĉe vi rifuĝejo kontraŭ venĝanto, por ke ne mortu la
mortiginto, antaŭ ol li staros antaŭ la komunumo por
juĝo. 13 Kaj el la urboj, kiujn vi donos, ses urboj de
rifuĝo estu ĉe vi. 14 Tri urbojn donu transe de Jordan
kaj tri urbojn donu en la lando Kanaana; urboj de
rifuĝo ili estu. 15 Por la Izraelidoj kaj por la fremdulo
kaj por la pasloĝanto inter ili estu tiuj ses urboj por
rifuĝo, por ke forkuru tien ĉiu, kiu mortigis homon
senintence. 16 Sed se per fera objekto li batis lin kaj ĉi
tiu mortis, tiam li estas mortiginto; la mortiginton oni
devas mortigi. 17 Kaj se li batis lin per mana ŝtono, de
kiu oni povas morti, kaj ĉi tiu mortis, tiam li estas
mortiginto; la mortiginton oni devas mortigi. 18 Aŭ se
li batis lin per mana objekto ligna, de kiu oni povas
morti, kaj ĉi tiu mortis, tiam li estas mortiginto; la
mortiginton oni devas mortigi. 19 La venĝanto de
la sango mem povas mortigi la mortiginton; kiam li
renkontos lin, li povas mortigi lin. 20 Se iu puŝis iun
pro malamo aŭ sin kaŝinte ĵetis ion sur lin kaj ĉi tiu
mortis, 21 aŭ se li malamike per sia mano batis lin
kaj ĉi tiu mortis, tiam oni devas mortigi la batinton:
li estas mortiginto; la venĝanto de la sango povas
mortigi la mortiginton, kiam li renkontos lin. 22 Sed
se per hazardo kaj ne pro malamikeco li puŝis lin, aŭ
se li ĵetis sur lin ian objekton sen malbonintenco, 23
aŭ se ŝtonon, de kiu oni povas morti, li ĵetis sur lin ne
vidante, kaj ĉi tiu mortis, sed li ne estis lia malamiko
kaj ne deziris al li malbonon: 24 tiam la komunumo
devas juĝi inter la batinto kaj la venĝanto de la sango
laŭ ĉi tiuj leĝoj; 25 kaj la komunumo devas savi la
mortiginton el la mano de la venĝanto de la sango, kaj
la komunumo revenigos lin en lian urbon de rifuĝo,
kien li forkuris; kaj li devas loĝi tie ĝis la morto de la
granda pastro, kiu estas oleita per sankta oleo. 26 Sed
se la mortiginto eliris el la limoj de sia urbo de rifuĝo,
kien li forkuris, 27 kaj la venĝanto de la sango trovis
lin ekster la limoj de lia urbo de rifuĝo kaj la venĝanto
de la sango mortigis la mortiginton, tiam li ne estas
kulpa pri la sango; 28 ĉar en sia urbo de rifuĝo li devas
resti ĝis la morto de la granda pastro, kaj post la
morto de la granda pastro la mortiginto povas reveni
sur la teron de sia posedaĵo. 29 Kaj tio estu por vi leĝa
regulo en viaj generacioj, en ĉiuj viaj lokoj de loĝado.
30 Ĉiun, kiu mortigis homon, tiun mortiginton oni
devas mortigi, se raportis pri li atestantoj; sed unu
atestanto ne sufiĉas, por kondamni homon al morto.
31 Ne prenu elaĉeton pro animo de mortiginto, kiu
estas malbonagulo mortiginda; oni devas lin mortigi.
32 Kaj ne prenu elaĉeton pro homo, kiu forkuris en
urbon de rifuĝo, ke li povu reveni kaj loĝi sur sia tero

antaŭ la morto de la pastro. 33 Kaj ne malhonoru la
teron, sur kiu vi estos, ĉar sango malhonoras la teron,
kaj nur per la sango de tiu, kiu verŝis sangon, la tero
povas puriĝi de la sango, kiu estas verŝita sur ĝi. 34
Kaj ne malpurigu la landon, en kiu vi loĝas kaj en kies
mezo Mi restas; ĉar Mi, la Eternulo, restas inter la
Izraelidoj.

36 Kaj aliris la familiestroj de la familio de Gilead,
filo de Maĥir, filo de Manase, el la familioj de
la Jozefidoj, kaj ekparolis antaŭ Moseo kaj antaŭ la
eminentuloj, la familiestroj de la Izraelidoj; 2 kaj ili
diris: Al nia sinjoro la Eternulo ordonis disdoni la
teron kiel posedaĵon per loto al la Izraelidoj, kaj al
nia sinjoro la Eternulo ordonis doni la parton de nia
frato Celofĥad al liaj filinoj. 3 Sed se ili fariĝos edzinoj
de iu el la filoj de alia tribo de la Izraelidoj, tiam
ilia posedaĵo estos forprenita el la posedaĵo de niaj
patroj, kaj aliĝos al la posedaĵo de tiu tribo, al kiu
ili ekapartenos, kaj el nia lote ricevita posedaĵo ĝi
estos forprenita. 4 Kaj kiam eĉ estos jubilea jaro ĉe la
Izraelidoj, ilia posedaĵo restos aligita al la posedaĵo de
tiu tribo, al kiu ili apartenos; kaj el la posedaĵo de la
tribo de niaj patroj ilia posedaĵo restos forprenita.
5 Tiam Moseo donis ordonon al la Izraelidoj laŭ la
instrukcio de la Eternulo, dirante: Prave parolas la
tribo de la Jozefidoj. 6 Jen kion ordonis la Eternulo
koncerne la filinojn de Celofĥad: Ili povas fariĝi
edzinoj de tiuj, kiuj plaĉos al ili, sed nur en familio
el la tribo de siaj patroj ili edziniĝu; 7 por ke ne
transiru hereda posedaĵo de la Izraelidoj el unu tribo
en alian tribon, ĉar ĉiu el la Izraelidoj devas resti
fortike ĉe la posedaĵo de la tribo de liaj patroj. 8 Kaj
ĉiu filino, kiu heredas posedaĵon en la triboj de la
Izraelidoj, devas edziniĝi kun iu el la familioj de la
tribo de ŝia patro, por ke la Izraelidoj heredu ĉiu la
posedaĵon de siaj patroj; 9 kaj por ke posedaĵo ne
transiru el unu tribo en alian tribon, sed ĉiu tribo
de la Izraelidoj restu fortike ĉe sia posedaĵo. 10 Kiel
la Eternulo ordonis al Moseo, tiel faris la filinoj de
Celofĥad; 11 kaj Maĥla, Tirca kaj Ĥogla kaj Milka kaj
Noa, la filinoj de Celofĥad, edziniĝis kun filoj de siaj
onkloj. 12 En la familioj de la filoj de Manase, filo
de Jozef, ili edziniĝis, kaj ilia posedaĵo restis en la
tribo de la familio de ilia patro. 13 Tio estas la ordonoj
kaj la leĝoj, kiujn la Eternulo donis per Moseo al la
Izraelidoj en la stepoj de Moab, ĉe la Jeriĥa Jordan.

# Readmono

1 Jen estas la vortoj, kiujn diris Moseo al la tuta Izrael
transe de Jordan, en la dezerto, en la stepo antaŭ
Suf, inter Paran kaj Tofel kaj Laban kaj Ĥacerot kaj Di-
Zahab, 2 dek unu tagojn malproksime de Ĥoreb, sur la
vojo de la monto Seir al Kadeŝ-Barnea. 3 Tio estis en la
kvardeka jaro, en la dek-unua monato, en la unua tago
de la monato, Moseo parolis al la Izraelidoj konforme
al ĉio, kion la Eternulo ordonis al li por ili. 4 Post kiam
li venkobatis Siĥonon, la reĝon de la Amoridoj, kiu
loĝis en Ĥeŝbon, kaj Ogon, la reĝon de Baŝan, kiu loĝis
en Aŝtarot kaj en Edrei; 5 transe de Jordan, en la lando
de Moab, Moseo komencis klarigi ĉi tiun instruon,
kaj diris: 6 La Eternulo, nia Dio, diris al ni sur Ĥoreb
jene: Sufiĉe vi loĝis sur ĉi tiu monto; 7 turniĝu kaj
elmoviĝu, kaj iru sur la monton de la Amoridoj kaj al
ĉiuj iliaj najbaroj en la stepo, sur la monto kaj en la
valo kaj en la sudo kaj sur la bordo de la maro, en la
landon de la Kanaanidoj kaj sur Lebanonon, ĝis la
granda rivero, la rivero Eŭfrato. 8 Vidu, Mi donas al
vi la landon; iru kaj ekposedu la landon, pri kiu la
Eternulo ĵuris al viaj patroj, al Abraham, al Isaak, kaj
al Jakob, ke Li donos ĝin al ili kaj al ilia idaro post ili.
9 Kaj mi diris al vi en tiu tempo jene: Mi ne povas sola
porti vin; 10 la Eternulo, via Dio, multigis vin, kaj jen
vi estas nun multego, kiel la steloj de la ĉielo. 11 La
Eternulo, la Dio de viaj patroj, multigu vin miloble
kontraŭ via nuna nombro, kaj Li benu vin, kiel Li diris
al vi! 12 Kiel mi povus sola porti la penadon por vi kaj
vian ŝarĝon kaj viajn disputojn? 13 Elektu al vi el viaj
triboj virojn saĝajn kaj kompetentajn kaj konatajn, kaj
mi starigos ilin, kiel viajn estrojn. 14 Kaj vi respondis
al mi kaj diris: Bona estas la afero, kiun vi proponis
fari. 15 Tiam mi prenis la ĉefojn de viaj triboj, virojn
saĝajn kaj konatajn, kaj mi faris ilin estroj super vi,
milestroj kaj centestroj kaj kvindekestroj kaj dekestroj
kaj kontrolistoj en viaj triboj. 16 Kaj mi ordonis al viaj
juĝistoj en tiu tempo, dirante: Aŭskultu viajn fratojn
kaj juĝu juste inter homo kaj lia frato kaj fremdulo.
17 Ne distingu vizaĝojn ĉe la juĝo; malgrandan kaj
grandan egale aŭskultu; timu neniun, ĉar la juĝo estas
afero de Dio; kaj aferon, kiu estos malfacila por vi,
venigu al mi, kaj mi ĝin aŭskultos. 18 Kaj mi donis al
vi ordonon en tiu tempo pri ĉio, kion vi devas fari. 19
Kaj ni foriris de Ĥoreb, kaj trairis tiun tutan grandan
kaj teruran dezerton, kiun vi vidis, sur la vojo al la
monto de la Amoridoj, kiel ordonis al ni la Eternulo,
nia Dio; kaj ni venis al Kadeŝ-Barnea. 20 Kaj mi diris
al vi: Vi venis al la monto de la Amoridoj, kiun la
Eternulo, nia Dio, donas al ni; 21 vidu, la Eternulo, via
Dio, donas al vi la landon; iru, ekposedu ĝin, kiel diris
al vi la Eternulo, la Dio de viaj patroj; ne timu kaj ne
tremu. 22 Sed vi ĉiuj aliris al mi, kaj diris: Ni sendu
antaŭ ni virojn, ke ili esploru por ni la landon, kaj
alportu al ni sciigon pri la vojo, per kiu ni devas iri,
kaj pri la urboj, al kiuj ni devas veni. 23 Kaj tio plaĉis
al mi, kaj mi prenis el vi dek du virojn, po unu viro el
tribo; 24 kaj ili iris kaj supreniris sur la monton, kaj
venis al la valo Eŝkol kaj esplorrigardis ĝin. 25 Kaj ili
prenis en siajn manojn iom el la fruktoj de la lando
kaj liveris al ni, kaj alportis al ni sciigon, kaj diris:
Bona estas la lando, kiun la Eternulo, nia Dio, donas al
ni. 26 Sed vi ne volis iri, kaj vi malobeis la vortojn de
la Eternulo, via Dio; 27 kaj vi murmuris en viaj tendoj,
kaj diris: Pro la malamo de la Eternulo kontraŭ ni,
Li elkondukis nin el la lando Egipta, por transdoni
nin en la manon de la Amoridoj, por ke ili ekstermu
nin; 28 kien ni iru? Niaj fratoj ektimigis nian koron,
dirante: La popolo estas pli granda kaj pli altkreska ol
ni, la urboj estas grandaj kaj fortikigitaj ĝis la ĉielo,
kaj ankaŭ Anakidojn ni tie vidis. 29 Kaj mi diris al
vi: Ne tremu kaj ne timu ilin; 30 la Eternulo via Dio,
kiu iras antaŭ vi, Li batalos por vi, simile al ĉio, kion
Li faris por vi en Egiptujo antaŭ viaj okuloj, 31 kaj
en la dezerto, kie, kiel vi vidis, la Eternulo, via Dio,
portis vin, kiel homo portas sian filon, sur la tuta
vojo, kiun vi iris, ĝis vi venis al ĉi tiu loko. 32 Sed
eĉ ĉe tio vi ne fidas la Eternulon, vian Dion, 33 kiu
iras antaŭ vi sur la vojo, por serĉi por vi lokon, kie vi
povus halti tendare, nokte en fajro, por montri al vi la
vojon, kiun vi devas iri, kaj tage en nubo. 34 Kaj la
Eternulo aŭdis viajn vortojn, kaj Li ekkoleris kaj ĵuris,
dirante: 35 Neniu el ĉi tiuj homoj, el ĉi tiu malbona
generacio, vidos la bonan landon, kiun Mi ĵuris doni
al viaj patroj; 36 nur Kaleb, filo de Jefune, vidos ĝin;
kaj pro tio, ke li sekvis la Eternulon, Mi donos al li kaj
al liaj filoj la landon, kiun li trairis. 37 Ankaŭ kontraŭ
mi la Eternulo ekkoleris pro vi, dirante: Vi ankaŭ ne
venos tien; 38 Josuo, filo de Nun, kiu staras antaŭ vi, li
venos tien; lin fortigu, ĉar li donos ĝin al Izrael kiel
posedaĵon. 39 Kaj viaj infanoj, pri kiuj vi diris, ke ili
fariĝos militakiraĵo, kaj viaj filoj, kiuj nun ankoraŭ ne
scias bonon nek malbonon, ili venos tien, kaj al ili Mi

donos ĝin, kaj ili ekposedos ĝin. 40 Sed vi turniĝu,
kaj iru en la dezerton en la direkto al la Ruĝa Maro.
41 Kaj vi respondis kaj diris al mi: Ni pekis antaŭ la
Eternulo; ni iros kaj batalos, konforme al ĉio, kion
ordonis al ni la Eternulo, nia Dio; kaj ĉiu el vi zonis
sin per siaj bataliloj, kaj vi pretigis vin, por iri sur
la monton. 42 Sed la Eternulo diris al mi: Diru al ili:
Ne iru kaj ne batalu, ĉar Mi ne estas inter vi; por ke
vi ne estu frapitaj de viaj malamikoj. 43 Kaj mi diris
al vi, sed vi ne aŭskultis; kaj vi malobeis la vortojn
de la Eternulo, kaj vi estis malhumilaj kaj iris sur la
monton. 44 Tiam eliris kontraŭ vin la Amoridoj, kiuj
loĝis sur tiu monto, kaj ili pelis vin tiel, kiel faras
la abeloj, kaj batis vin sur Seir ĝis Ĥorma. 45 Kaj vi
revenis kaj ploris antaŭ la Eternulo; sed la Eternulo ne
aŭskultis vian voĉon kaj ne atentis vin. 46 Kaj vi loĝis
en Kadeŝ longan tempon, la tempon, dum kiu vi loĝis.

**2** Kaj ni turnis nin kaj elmoviĝis en la dezerton en la
direkto al la Ruĝa Maro, kiel la Eternulo diris al mi;
kaj ni ĉirkaŭiris la monton Seir dum longa tempo. 2
Kaj la Eternulo diris al mi jene: 3 Sufiĉe vi ĉirkaŭiris
ĉi tiun monton; turnu vin norden; 4 kaj al la popolo
donu tian ordonon: Vi preteriros la limon de viaj
fratoj la Esavidoj, kiuj loĝas sur Seir, kaj ili timos vin;
sed gardu vin forte. 5 Ne komencu batalon kontraŭ
ili, ĉar Mi ne donos al vi el ilia lando eĉ larĝecon de
plando; ĉar al Esav Mi donis, kiel heredaĵon, la monton
Seir. 6 Manĝaĵon aĉetu de ili pro mono kaj manĝu; kaj
eĉ akvon aĉetu de ili pro mono kaj trinku; 7 ĉar la
Eternulo, via Dio, benis vin en ĉiu faro de viaj manoj;
Li gvidis vian iradon tra ĉi tiu granda dezerto; jen
jam kvardek jarojn la Eternulo estas kun vi, kaj nenio
mankis al vi. 8 Kaj ni preteriris flanke de niaj fratoj la
Esavidoj, kiuj loĝas sur Seir, flanke de la vojo stepa, de
Elat kaj de Ecjon-Geber. Kaj ni turnis nin kaj iris laŭ la
vojo al la dezerto de Moab. 9 Kaj la Eternulo diris al
mi: Ne faru malamikaĵon al Moab kaj ne komencu
militon kontraŭ ili, ĉar Mi ne donos al vi heredaĵon
el ilia lando; ĉar al la filoj de Lot Mi donis Aron
kiel heredan posedaĵon. 10 La Emidoj antaŭe loĝis
tie, popolo granda kaj grandnombra, kaj altkreska
kiel la Anakidoj. 11 Ankaŭ ilin oni kalkulis inter la
Rafaidoj, kiel la Anakidojn; kaj la Moabidoj nomas ilin
Emidoj. 12 Kaj sur Seir loĝis antaŭe la Ĥoridoj; sed la
Esavidoj forpelis ilin kaj ekstermis ilin de antaŭ si
kaj ekloĝis sur ilia loko, kiel agis Izrael kun la lando
de sia posedaĵo, kiun la Eternulo donis al ili.) 13 Nun
leviĝu kaj transiru la valon Zared. Kaj ni transiris la
valon Zared. 14 Kaj la tempo, dum kiu ni iris de Kadeŝ-
Barnea, ĝis ni transiris la valon Zared, estis tridek ok
jaroj, ĝis formortis el la tendaro la tuta generacio de
militistoj, kiel ĵuris al ili la Eternulo. 15 Kaj ankaŭ la
mano de la Eternulo estis sur ili, por ekstermi ilin
el inter la tendaro, ĝis ili ĉiuj formortis. 16 Kaj kiam
formortis ĉiuj militistoj el inter la popolo, 17 tiam la
Eternulo ekparolis al mi, dirante: 18 Vi iras nun preter
la limo de Moab, preter Ar, 19 kaj vi alproksimiĝas al
la Amonidoj; ne faru al ili malamikaĵon kaj ne batalu
kontraŭ ili, ĉar Mi ne donos al vi heredaĵon el la lando
de la Amonidoj; ĉar al la filoj de Lot Mi donis ĝin
kiel heredan posedaĵon. 20 Kiel landon de Rafaidoj
oni rigardas ankaŭ ĝin; Rafaidoj loĝis en ĝi antaŭe;
kaj la Amonidoj nomas ilin Zamzumoj; 21 tio estis
popolo granda kaj grandnombra, kaj altkreska kiel
la Anakidoj; sed la Eternulo ekstermis ilin antaŭ ili,
kaj ili forpelis ilin kaj ekloĝis sur ilia loko; 22 kiel Li
faris por la Esavidoj, kiuj loĝas sur Seir, antaŭ kiuj
Li ekstermis la Ĥoridojn, kaj ili forpelis ilin kaj loĝis
sur ilia loko ĝis la nuna tago. 23 Kaj la Avidojn, kiuj
loĝis en vilaĝoj ĝis Gaza, ekstermis la Kaftoridoj, kiuj
eliris el Kaftor, kaj ili ekloĝis sur ilia loko.) 24 Leviĝu,
elmoviĝu kaj transiru la torenton Arnon; rigardu,
Mi transdonas en vian manon Siĥonon, la reĝon
de Ĥeŝbon, la Amoridon, kaj lian landon; komencu
ekposedi kaj militu kontraŭ li. 25 De la nuna tago Mi
komencos ĵetadi teruron kaj timon antaŭ vi sur la
popolojn sub la tuta ĉielo; tiuj, kiuj aŭdos la famon
pri vi, ektremos kaj ektimos antaŭ vi. 26 Kaj mi
sendis senditojn el la dezerto Kedemot al Siĥon, la
reĝo de Ĥeŝbon, kun vortoj de paco, dirante: 27 Mi
dezirus iri tra via lando; mi iros nur laŭ la vojo, mi ne
forflankiĝos dekstren nek maldekstren; 28 manĝaĵon
vendu al mi pro mono, kaj mi manĝos, kaj akvon
donu al mi pro mono, kaj mi trinkos: nur per miaj
piedoj mi trairos — 29 kiel faris al mi la Esavidoj,
kiuj loĝas sur Seir, kaj la Moabidoj, kiuj loĝas en Ar
— ĝis mi transiros Jordanon en la landon, kiun la
Eternulo, nia Dio, donas al ni. 30 Sed ne volis Siĥon, la
reĝo de Ĥeŝbon, tralasi nin, ĉar la Eternulo, via Dio,
obstinigis lian spiriton kaj malcedemigis lian koron,
por transdoni lin en vian manon, kiel nun. 31 Kaj la
Eternulo diris al mi: Rigardu, Mi komencas transdoni
al vi Siĥonon kaj lian landon; komencu posedpreni

lian landon. 32 Kaj Siĥon eliris kontraŭ nin, li kaj lia
tuta popolo, por batalo apud Jahac. 33 Kaj transdonis
lin la Eternulo, nia Dio, al ni, kaj ni venkobatis lin kaj
liajn filojn kaj lian tutan popolon. 34 Kaj ni militakiris
en tiu tempo ĉiujn liajn urbojn, kaj ni ekstermis en
ĉiu urbo la virojn kaj la virinojn kaj la infanojn, ni
restigis neniun; 35 nur la brutojn ni prenis al ni,
kiel militakiraĵon, kaj la rabaĵon el la urboj, kiujn ni
militakiris. 36 De Aroer, kiu estas sur la bordo de la
torento Arnon, kaj la urbo, kiu estas en la valo, ĝis
Gilead ne estis urbo, kiu povus kontraŭstari al ni: ĉion
transdonis al ni la Eternulo, nia Dio; 37 nur al la lando
de la Amonidoj vi ne alproksimiĝis, al la tuta bordo
de la torento Jabok, kaj al la urboj de la monto, kaj al
ĉio, pri kio malpermesis la Eternulo, nia Dio.

**3** Kaj ni turnis nin kaj ekiris laŭ la vojo al Baŝan. Kaj
eliris kontraŭ nin Og, la reĝo de Baŝan, li kaj lia tuta
popolo, por batalo apud Edrei. 2 Kaj la Eternulo diris
al mi: Ne timu lin; ĉar en vian manon Mi transdonis
lin kaj lian tutan popolon kaj lian landon, kaj vi faros
al li, kiel vi faris al Siĥon, la reĝo de la Amoridoj, kiu
loĝis en Ĥeŝbon. 3 Kaj la Eternulo, nia Dio, transdonis
en nian manon ankaŭ Ogon, la reĝon de Baŝan, kaj lian
tutan popolon; kaj ni batis lin tiel, ke neniu restis ĉe
li. 4 Kaj ni militakiris tiam ĉiujn liajn urbojn; ne estis
urbo, kiun ni ne prenis de ili: sesdek urbojn, la tutan
distrikton de Argob, la regnon de Og la Baŝana. 5 Ĉiuj
tiuj urboj estis fortikigitaj per alta muro, per pordegoj
kaj rigliloj, krom la tre multaj urboj ne fortikigitaj. 6
Kaj ni ekstermis ilin, kiel ni faris al Siĥon, la reĝo de
Ĥeŝbon, ni ekstermis en ĉiu urbo la virojn, la virinojn,
kaj la infanojn; 7 sed ĉiujn brutojn kaj la rabaĵon el
la urboj ni prenis al ni, kiel militakiraĵon. 8 Kaj ni
prenis tiam el la manoj de la du reĝoj de la Amoridoj
la landon, kiu estas transe de Jordan, de la torento
Arnon ĝis la monto Ĥermon 9 la Cidonanoj nomas
Ĥermonon Sirjon, kaj la Amoridoj nomas ĝin Senir),
10 ĉiujn urbojn sur la ebenaĵo, kaj la tutan Gileadon
kaj la tutan Baŝanon ĝis Salĥa kaj Edrei, urboj de la
regno de Og la Baŝana. 11 Ĉar nur Og, la reĝo de Baŝan,
estis restinta el la resto de la Rafaidoj. Jen estas lia
lito, fera lito, jen ĝi estas en Raba de la Amonidoj:
naŭ ulnoj estas ĝia longeco kaj kvar ulnoj estas ĝia
larĝeco, laŭ la ulnoj de viro.) 12 Kaj tiun landon ni
ekposedis en tiu tempo: de Aroer, kiu estas apud la
torento Arnon, kaj duonon de la monto Gilead kun
ĝiaj urboj mi donis al la Rubenidoj kaj al la Gadidoj; 13
kaj la ceteran parton de Gilead kaj la tutan Baŝanon,
la regnon de Og, mi donis al duono de la tribo de
Manase, la tutan distrikton de Argob. (La tutan tiun
Baŝanon oni nomas lando de Rafaidoj. 14 Jair, filo de
Manase, prenis la tutan distrikton de Argob ĝis la
limo de la Geŝuridoj kaj Maaĥatidoj, kaj li donis al
Baŝan laŭ sia nomo la nomon Vilaĝoj de Jair, tiel estas
ĝis nun.) 15 Kaj al Maĥir mi donis Gileadon. 16 Kaj al
la Rubenidoj kaj al la Gadidoj mi donis de Gilead ĝis
la torento Arnon, kun la mezo de la valo por limo;
ankaŭ ĝis la torento Jabok, limo de la Amonidoj; 17
kaj la stepon, kun Jordan por limo, de Kineret ĝis la
maro de la ebenaĵo, la Sala Maro, ĉe la bazo de Pisga
en la oriento. 18 Kaj mi faris al vi ordonon en tiu
tempo, dirante: La Eternulo, via Dio, donis al vi ĉi
tiun landon, por ke vi posedu ĝin; armitaj iru antaŭ
viaj fratoj la Izraelidoj, ĉiuj militkapablaj. 19 Nur viaj
edzinoj kaj viaj infanoj kaj viaj brutaroj — mi scias, ke
vi havas grandnombrajn brutarojn — restu en viaj
urboj, kiujn mi donis al vi; 20 ĝis la Eternulo donos
ripozon al viaj fratoj, kiel al vi, kaj ili ankaŭ ekposedos
la landon, kiun la Eternulo, via Dio, donas al ili transe
de Jordan; tiam vi reiros ĉiu al sia posedaĵo, kiun mi
donis al vi. 21 Kaj al Josuo mi ordonis en tiu tempo,
dirante: Viaj okuloj vidis ĉion, kion la Eternulo, via
Dio, faris al tiuj du reĝoj; tiel la Eternulo faros al
ĉiuj regnoj, kiujn vi trairos. 22 Ne timu ilin; ĉar la
Eternulo, via Dio, batalas por vi. 23 Kaj mi preĝis al la
Eternulo en tiu tempo, dirante: 24 Mia Sinjoro, ho
Eternulo! Vi komencis montradi al Via servanto Vian
grandecon kaj Vian fortan manon; ĉar kie estas dio
en la ĉielo aŭ sur la tero, kiu povus fari simile al Viaj
faroj kaj al Via potenco? 25 Mi dezirus transiri kaj
vidi tiun bonan landon, kiu estas transe de Jordan,
tiun belan monton kaj Lebanonon. 26 Sed la Eternulo
ekkoleris kontraŭ mi pro vi kaj ne aŭskultis min; kaj la
Eternulo diris al mi: Sufiĉe, ne parolu al Mi plu pri tio.
27 Supreniru sur la supron de Pisga, kaj direktu viajn
okulojn al okcidento kaj al nordo kaj al sudo kaj al
oriento kaj rigardu per viaj okuloj; ĉar vi ne transiros
ĉi tiun Jordanon. 28 Kaj donu instrukciojn al Josuo kaj
fortigu kaj kuraĝigu lin, ĉar li transiros antaŭ ĉi tiu
popolo, kaj li posedigos al ili la landon, kiun vi vidos.
29 Kaj ni restis en la valo, kontraŭ Bet-Peor.

4 Kaj nun, ho Izrael, aŭskultu la leĝojn kaj la regulojn,
kiujn mi instruas al vi, ke vi ilin plenumu, por ke vi
vivu kaj venu kaj heredu la landon, kiun la Eternulo, la
Dio de viaj patroj, donas al vi. 2 Ne aldonu al tio, kion
mi ordonas al vi, kaj ne deprenu de ĝi; sed observu la
ordonojn de la Eternulo, via Dio, kiujn mi ordonas
al vi. 3 Viaj okuloj vidis, kion la Eternulo faris pro
Baal-Peor; ĉar ĉiun homon, kiu sekvis Baal-Peoron,
la Eternulo, via Dio, ekstermis el inter vi; 4 sed vi,
kiuj restis aliĝintaj al la Eternulo, via Dio, vi ĉiuj vivas
hodiaŭ. 5 Rigardu, mi instruis al vi leĝojn kaj regulojn,
kiel ordonis al mi la Eternulo, mia Dio, ke vi agu tiel
en la lando, en kiun vi venas, por ekposedi ĝin. 6 Kaj
observu kaj plenumu ilin; ĉar tio estas via saĝo kaj
via prudento en la okuloj de la popoloj, kiuj aŭdos
pri ĉiuj ĉi tiuj leĝoj, kaj diros: Efektive, popolo saĝa
kaj prudenta estas tiu granda popolo. 7 Ĉar kie estas
granda popolo, al kiu dioj estas tiel proksimaj, kiel la
Eternulo, nia Dio, ĉiufoje, kiam ni vokas al Li? 8 Kaj
kie estas granda popolo, kiu havas leĝojn kaj regulojn
justajn, kiel la tuta ĉi tiu instruo, kiun mi donas al vi
hodiaŭ? 9 Nur gardu vin kaj forte gardu vian animon,
ke vi ne forgesu la aferojn, kiujn vidis viaj okuloj,
kaj ke ili ne eliru el via koro dum via tuta vivo; kaj
rakontu al viaj filoj kaj al la filoj de viaj filoj 10 pri la
tago, en kiu vi staris antaŭ la Eternulo, via Dio, ĉe
Ĥoreb, kiam la Eternulo diris al mi: Kunvenigu al Mi
la popolon, kaj Mi aŭdigos al ili Miajn vortojn, per
kiuj ili lernos timi Min dum la tuta tempo, kiun ili
vivas sur la tero, kaj ili lernigos siajn filojn. 11 Tiam vi
alproksimiĝis kaj stariĝis ĉe la bazo de la monto, kaj
la monto brulis per fajro ĝis la mezo de la ĉielo, en
mallumo, nubo, kaj nebulo. 12 Kaj la Eternulo parolis
al vi el meze de la fajro; la voĉon de la vortoj vi aŭdis,
sed figuron vi ne vidis, nur la voĉon. 13 Kaj Li sciigis
al vi Sian interligon, kiun Li ordonis al vi plenumi, la
dek ordonojn; kaj Li skribis ilin sur du ŝtonaj tabeloj.
14 Kaj al mi la Eternulo en tiu tempo ordonis instrui al
vi la leĝojn kaj regulojn, por ke vi plenumadu ilin en
la lando, en kiun vi iras, por ekposedi ĝin. 15 Gardu
do bone viajn animojn: ĉar vi vidis nenian figuron en
tiu tago, kiam la Eternulo parolis al vi sur Ĥoreb el
meze de la fajro; 16 vi do ne malĉastiĝu, kaj ne faru al
vi ian skulptaĵon, bildon de ia idolo, figuron de viro
aŭ virino, 17 figuron de ia bruto, kiu estas sur la tero,
figuron de ia flugilhava birdo, kiu flugas sub la ĉielo,
18 figuron de io, kio rampas sur la tero, figuron de ia
fiŝo, kiu estas en akvo, malsupre de la tero. 19 Kaj,
levinte viajn okulojn al la ĉielo kaj vidinte la sunon
kaj la lunon kaj la stelojn kaj la tutan armeon de la
ĉielo, ne forlogiĝu, kaj ne adorkliniĝu antaŭ ili kaj
ne servu ilin, kiujn la Eternulo, via Dio, destinis por
ĉiuj popoloj sub la tuta ĉielo. 20 Kaj vin la Eternulo
prenis, kaj elkondukis vin el la fera forno, el Egiptujo,
por ke vi estu al Li popolo herede apartenanta, kiel
nun. 21 Kaj la Eternulo ekkoleris min pro vi, kaj ĵuris,
ke mi ne transiros Jordanon, kaj mi ne venos en la
bonan landon, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi
kiel posedaĵon; 22 ĉar mi mortos en ĉi tiu lando, mi
ne transiros Jordanon, sed vi transiros kaj ekposedos
tiun bonan landon. 23 Gardu vin, ke vi ne forgesu la
interligon de la Eternulo, via Dio, kiun Li faris kun vi,
kaj ke vi ne faru al vi ian skulptaĵon, figuron de io, kiel
ordonis al vi la Eternulo, via Dio. 24 Ĉar la Eternulo,
via Dio, estas fajro konsumanta, Dio severa. 25 Se vi
naskos filojn kaj filojn de filoj, kaj, longe vivinte sur la
tero, vi malĉastiĝos kaj faros skulptitan figuron de io
kaj faros malbonon antaŭ la okuloj de la Eternulo, via
Dio, kolerigante Lin: 26 mi atestigas al vi hodiaŭ la
ĉielon kaj la teron, ke vi rapide pereos de sur la tero,
por kies ekposedo vi transiras Jordanon; ne longe
vi loĝos sur ĝi, sed vi estos ekstermitaj. 27 Kaj la
Eternulo dissemos vin inter la popoloj, kaj vi restos en
malgranda nombro inter la popoloj, al kiuj la Eternulo
vin foririgos. 28 Kaj vi servos tie al dioj, kiuj estas
faritaĵo de homaj manoj, ligno kaj ŝtono, kiuj ne vidas
kaj ne aŭdas kaj ne manĝas kaj ne flaras. 29 Kaj vi
serĉos el tie la Eternulon, vian Dion; kaj vi trovos, se
vi serĉos Lin per via tuta koro kaj per via tuta animo.
30 Kiam vi estos en mizero kaj kiam vin trafos ĉio ĉi
tio en la malproksima venonta tempo, tiam vi revenos
al la Eternulo, via Dio, kaj vi aŭskultos Lian voĉon;
31 ĉar la Eternulo, via Dio, estas Dio kompatema; Li
ne forlasos vin nek pereigos vin, kaj ne forgesos la
interligon kun viaj patroj, pri kiu Li ĵuris al ili. 32 Ĉar
demandu la tempojn antaŭajn, kiuj estis antaŭ vi de
post tiu tago, en kiu la Eternulo kreis homon sur la
tero, kaj de unu rando de la ĉielo ĝis la alia rando:
Ĉu estis io, kiel ĉi tiu granda afero, aŭ ĉu oni aŭdis
pri io simila? 33 Ĉu aŭdis la popolo la voĉon de Dio,
parolantan el meze de fajro, kiel vi aŭdis, kaj restis
vivanta? 34 Aŭ ĉu provis ia dio iri kaj preni al si unu
popolon el inter alia popolo per provoj, per signoj, kaj
per mirakloj, kaj per milito kaj per forta mano kaj per

etendita brako kaj per grandaj teruraĵoj, simile al ĉio,
kion faris al vi la Eternulo, via Dio, en Egiptujo, antaŭ
viaj okuloj? 35 Al vi tio estis montrita, por ke vi sciu,
ke la Eternulo estas Dio, ke ne ekzistas alia krom Li. 36
El la ĉielo Li aŭdigis al vi Sian voĉon, por instrui vin,
kaj sur la tero Li montris al vi Sian grandan fajron, kaj
Liajn vortojn vi aŭdis el meze de la fajro. 37 Kaj ĉar
Li amis viajn patrojn, tial Li elektis ilian idaron post
ili, kaj elkondukis vin per Sia vizaĝo, per Sia granda
forto el Egiptujo, 38 por forpeli de antaŭ vi popolojn,
kiuj estas pli grandaj kaj pli fortaj ol vi, por envenigi
vin kaj doni al vi ilian landon kiel posedaĵon, kiel
nun. 39 Sciu do nun kaj enmetu en vian koron, ke la
Eternulo estas Dio en la ĉielo supre kaj sur la tero
malsupre; ne ekzistas alia. 40 Kaj observu Liajn leĝojn
kaj Liajn ordonojn, kiujn mi ordonas al vi hodiaŭ, por
ke estu bone al vi kaj al viaj filoj post vi, kaj por ke
vi longe vivu sur la tero, kiun la Eternulo, via Dio,
donas al vi por ĉiam. 41 Tiam Moseo apartigis tri
urbojn transe de Jordan, sur la flanko de sunleviĝo,
42 por ke tien forkuru mortiginto, kiu mortigis sian
proksimulon senintence, ne estinte malamika al li
de antaŭe, kaj forkurinte al unu el tiuj urboj, li restu
viva: 43 Becer en la dezerto, sur la ebenaĵo, por la
Rubenidoj, kaj Ramot en Gilead por la Gadidoj, kaj
Golan en Baŝan por la Manaseidoj. 44 Kaj jen estas
la instruo, kiun Moseo proponis al la Izraelidoj; 45
jen estas la atestoj kaj la leĝoj kaj la reguloj, kiujn
Moseo eldiris al la Izraelidoj post ilia eliro el Egiptujo,
46 transe de Jordan, en la valo kontraŭ Bet-Peor, en
la lando de Siĥon, reĝo de la Amoridoj, kiu loĝis en
Ĥeŝbon kaj kiun venkobatis Moseo kaj la Izraelidoj
post sia eliro el Egiptujo; 47 kaj ili ekposedis lian
landon, kaj la landon de Og, reĝo de Baŝan, la du reĝoj
de la Amoridoj, kiuj estis transe de Jordan, sur la
flanko de sunleviĝo, 48 de Aroer, kiu estas sur la bordo
de la torento Arnon, ĝis la monto Sion (kiu ankaŭ
nomiĝas Ĥermon); 49 kaj la tutan stepon transe de
Jordan oriente kaj ĝis la maro de la stepo ĉe la bazo
de Pisga.

**5** Kaj Moseo kunvokis ĉiujn Izraelidojn, kaj diris al
ili: Aŭskultu, ho Izrael, la leĝojn kaj la regulojn,
kiujn mi diras en viajn orelojn hodiaŭ, kaj lernu ilin
kaj observu plenumi ilin. 2 La Eternulo, nia Dio, faris
kun ni interligon sur Ĥoreb. 3 Ne kun niaj patroj
la Eternulo faris tiun interligon, sed kun ni, kun ni,
kiuj nun ĉi tie ĉiuj vivas. 4 Vizaĝon kontraŭ vizaĝo la
Eternulo parolis kun vi sur la monto el meze de la
fajro; 5 mi tiam staris inter la Eternulo kaj vi, por
transdiri al vi la vorton de la Eternulo, ĉar vi timis la
fajron kaj ne supreniris sur la monton. Kaj Li diris: 6
Mi estas la Eternulo, via Dio, kiu elkondukis vin el la
lando Egipta, el la domo de sklaveco. 7 Ne ekzistu
ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi. 8 Ne faru al vi idolon, nek
bildon de io, kio estas en la ĉielo supre aŭ sur la tero
malsupre aŭ en la akvo sub la tero; 9 ne kliniĝu antaŭ
ili kaj ne servu ilin; ĉar Mi, la Eternulo, via Dio, estas
Dio severa, kiu la malbonagon de la patroj punas
sur la idoj en la tria kaj kvara generacioj ĉe Miaj
malamantoj, 10 kaj kiu faras favorkoraĵon por miloj al
Miaj amantoj kaj al la plenumantoj de Miaj ordonoj.
11 Ne malbonuzu la nomon de la Eternulo, via Dio; ĉar
la Eternulo ne lasos senpuna tiun, kiu malbonuzas
Lian nomon. 12 Observu la tagon sabatan, ke vi tenu
ĝin sankta, kiel ordonis al vi la Eternulo, via Dio. 13
Dum ses tagoj laboru kaj faru ĉiujn viajn aferojn;
14 sed la sepa tago estas sabato de la Eternulo, via
Dio; faru nenian laboron, nek vi, nek via filo, nek via
filino, nek via sklavo, nek via sklavino, nek via bovo,
nek via azeno, nek ia via bruto, nek via fremdulo, kiu
estas inter viaj pordegoj; por ke ripozu via sklavo
kaj via sklavino, kiel vi. 15 Kaj memoru, ke vi estis
sklavo en la lando Egipta, kaj la Eternulo, via Dio,
elkondukis vin el tie per mano forta kaj per brako
etendita; pro tio ordonis al vi la Eternulo, via Dio,
observi la tagon sabatan. 16 Respektu vian patron
kaj vian patrinon, kiel ordonis al vi la Eternulo, via
Dio; por ke longe daŭru via vivo, kaj por ke estu al vi
bone sur la tero, kiun la Eternulo, via Dio, donas al
vi. 17 Ne mortigu. 18 Kaj ne adultu. 19 Kaj ne ŝtelu.
20 Kaj ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran
ateston. 21 Kaj ne deziru la edzinon de via proksimulo;
kaj ne deziru la domon de via proksimulo, nek lian
kampon, nek lian sklavon, nek lian sklavinon, nek
lian bovon, nek lian azenon, nek ion, kio apartenas al
via proksimulo. 22 Tiujn vortojn diris la Eternulo al
via tuta anaro sur la monto, el meze de la fajro, nubo,
kaj nebulo, per voĉo laŭta; kaj Li nenion plu aldonis.
Kaj Li skribis ilin sur du ŝtonaj tabeloj kaj donis ilin
al mi. 23 Kaj kiam vi aŭdis la voĉon el la mallumo,
dum la monto brulis per fajro, tiam vi aliris al mi,
ĉiuj viaj tribestroj kaj plejaĝuloj; 24 kaj vi diris: Jen la
Eternulo, nia Dio, montris al ni Sian majeston kaj Sian

grandecon, kaj Lian voĉon ni aŭdis el meze de la fajro;
en tiu tago ni vidis, ke parolas Dio al homo, kaj ĉi tiu
restas vivanta. 25 Sed nun por kio ni mortu? nin ja
formanĝos ĉi tiu granda fajro; se ni plue aŭskultos
la voĉon de la Eternulo, nia Dio, ni mortos. 26 Ĉar
kie ekzistas ia karno, kiu aŭdis la voĉon de la vivanta
Dio, parolantan el meze de fajro, kiel ni, kaj restis
vivanta? 27 Alproksimiĝu vi, kaj aŭskultu ĉion, kion
diros la Eternulo, nia Dio; kaj vi transdiros al ni ĉion,
kion diros la Eternulo, nia Dio, kaj ni aŭskultos kaj ni
plenumos. 28 Kaj la Eternulo aŭdis la voĉon de viaj
vortoj, kiam vi parolis al mi; kaj la Eternulo diris al
mi: Mi aŭdis la voĉon de la vortoj de ĉi tiu popolo,
kiujn ili diris al vi; bona estas ĉio, kion ili diris. 29 Ho,
se ilia koro restus ĉe ili tia, ke ili timu Min kaj observu
ĉiujn Miajn ordonojn ĉiutempe, por ke estu bone al ili
kaj al iliaj filoj eterne! 30 Iru, diru al ili: Reiru en viajn
tendojn. 31 Kaj vi ĉi tie restu kun Mi, kaj Mi eldiros
al vi ĉiujn ordonojn kaj leĝojn kaj regulojn, kiujn vi
instruos al ili, por ke ili plenumadu ilin en la lando,
kiun Mi donas al ili kiel posedaĵon. 32 Kaj observu,
ke vi faru, kiel ordonis al vi la Eternulo, via Dio; ne
forflankiĝu dekstren, nek maldekstren. 33 Laŭ tiu tuta
vojo, kiun ordonis al vi la Eternulo, via Dio, iradu, por
ke vi vivu kaj por ke estu bone al vi, kaj por ke longe
daŭru via restado en la lando, kiun vi ekposedos.

**6** Kaj jen estas la ordonoj, la leĝoj, kaj la reguloj,
kiujn la Eternulo, via Dio, ordonis instrui al vi, por
ke vi plenumadu ilin en la lando, en kiun vi transiras,
por ekposedi ĝin; 2 por ke vi timu la Eternulon, vian
Dion, observante ĉiujn Liajn leĝojn kaj Liajn ordonojn,
kiujn mi ordonas al vi, vi kaj via filo kaj la filo de
via filo, dum via tuta vivo, por ke vi longe vivu. 3
Aŭskultu do, Izrael, kaj observu, ke vi plenumu, por
ke estu al vi bone, kaj por ke vi tre multiĝu, kiel diris
al vi la Eternulo, la Dio de viaj patroj, en la lando,
en kiu fluas lakto kaj mielo. 4 Aŭskultu, ho Izrael! la
Eternulo, nia Dio, la Eternulo estas unu sola. 5 Kaj
amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj
per via tuta animo kaj per via tuta forto. 6 Kaj ĉi tiuj
vortoj, kiujn mi ordonas al vi hodiaŭ, estu en via koro;
7 kaj ripetadu ilin al viaj infanoj, kaj parolu pri ili,
kiam vi sidas en via domo kaj kiam vi iras sur vojo kaj
kiam vi kuŝiĝas kaj kiam vi leviĝas; 8 kaj alligu ilin
kiel signon al via mano, kaj ili estu kiel memorigaĵo
inter viaj okuloj; 9 kaj skribu ilin sur la fostoj de via
domo kaj sur viaj pordegoj. 10 Kaj kiam la Eternulo,
via Dio, venigos vin en la landon, pri kiu Li ĵuris al
viaj patroj, al Abraham, al Isaak, kaj al Jakob, ke Li
donos al vi grandajn kaj bonajn urbojn, kiujn vi ne
konstruis, 11 kaj domojn plenajn de ĉia bonaĵo, kiujn
vi ne plenigis, kaj putojn, elhakitajn en ŝtono, kiujn
vi ne elhakis, vinberejojn kaj olivarbojn, kiujn vi ne
plantis; kaj vi manĝos kaj estos sata: 12 tiam gardu
vin, ke vi ne forgesu la Eternulon, kiu elkondukis
vin el la lando Egipta, el la domo de sklaveco. 13 La
Eternulon, vian Dion, timu, kaj al Li servu, kaj per Lia
nomo ĵuru. 14 Ne sekvu aliajn diojn el la dioj de la
popoloj, kiuj estas ĉirkaŭ vi; 15 ĉar la Eternulo, via Dio
inter vi, estas Dio severa; povas ekflami la kolero de la
Eternulo, via Dio, kontraŭ vin, kaj Li ekstermos vin de
sur la tero. 16 Ne provu la Eternulon, vian Dion, kiel
vi provis Lin en Masa. 17 Precize observu la ordonojn
de la Eternulo, via Dio, kaj Liajn atestojn kaj Liajn
leĝojn, kiujn Li ordonis al vi. 18 Kaj faru juston kaj
bonon antaŭ la okuloj de la Eternulo, por ke estu
bone al vi, kaj por ke vi venu kaj ekposedu la bonan
landon, pri kiu la Eternulo ĵuris al viaj patroj; 19 por
ke Li forpelu ĉiujn viajn malamikojn antaŭ vi, kiel la
Eternulo diris. 20 Se via filo vin demandos morgaŭ:
Kion signifas la atestoj kaj leĝoj kaj reguloj, kiujn la
Eternulo, nia Dio, ordonis al vi? 21 tiam diru al via filo:
Ni estis sklavoj al Faraono en Egiptujo, sed la Eternulo
elkondukis nin el Egiptujo per forta mano; 22 kaj la
Eternulo aperigis signojn kaj miraklojn grandajn kaj
suferigajn en Egiptujo, sur Faraono kaj sur lia tuta
domo, antaŭ niaj okuloj; 23 kaj nin Li elkondukis el
tie, por venigi nin kaj doni al ni la landon, pri kiu
Li ĵuris al niaj patroj. 24 Kaj la Eternulo ordonis al
ni plenumi ĉiujn ĉi tiujn leĝojn, timi la Eternulon,
nian Dion, por ke estu al ni bone ĉiam, por konservi
al ni la vivon, kiel en la nuna tago. 25 Kaj tio estos nia
justeco, se ni observos plenumi ĉi tiun tutan ordonon
antaŭ la Eternulo, nia Dio, kiel Li ordonis al ni.

**7** Kiam la Eternulo venigos vin en la landon, al
kiu vi iras, por ekposedi ĝin, kaj Li forpelos
antaŭ vi grandnombrajn popolojn, la Ĥetidojn kaj la
Girgaŝidojn kaj la Amoridojn kaj la Kanaanidojn kaj
la Perizidojn kaj la Ĥividojn kaj la Jebusidojn, sep
popolojn pli grandnombrajn kaj pli fortajn ol vi; 2 kaj
kiam la Eternulo, via Dio, transdonos ilin al vi, kaj vi
venkobatos ilin; tiam anatemu ilin, ne faru kun ili

interligon kaj ne indulgu ilin. 3 Kaj ne boparenciĝu
kun ili: vian filinon ne donu al ilia filo, kaj ilian filinon
ne prenu por via filo; 4 ĉar ili forturnos viajn filojn de
Mi, ke ili servu al aliaj dioj, kaj ekflamos kontraŭ vi la
kolero de la Eternulo, kaj Li ekstermos vin rapide. 5
Sed tiele agu kun ili: iliajn altarojn detruu kaj iliajn
statuojn rompu kaj iliajn sanktajn stangojn dishaku
kaj iliajn idolojn forbruligu per fajro. 6 Ĉar popolo
sankta vi estas al la Eternulo, via Dio; vin elektis
la Eternulo, via Dio, ke vi estu Lia popolo propra
el ĉiuj popoloj, kiuj estas sur la tero. 7 Ne pro tio,
ke vi estas la plej grandnombra el ĉiuj popoloj, la
Eternulo ekdeziris vin kaj elektis vin, ĉar vi estas ja
malpli grandnombra ol ĉiuj popoloj; 8 sed pro la amo
de la Eternulo al vi, kaj por ke Li plenumu la ĵuron,
kiun Li ĵuris al viaj patroj, la Eternulo elkondukis
vin per forta mano kaj liberigis vin el la domo de
sklaveco, el la mano de Faraono, reĝo de Egiptujo. 9
Sciu do, ke la Eternulo, via Dio, nur Li estas Dio, Dio
fidinda, kiu konservas la interligon kaj favorkorecon
rilate al Liaj amantoj kaj al la plenumantoj de Liaj
ordonoj dum mil generacioj, 10 kaj kiu repagas al Siaj
malamantoj persone, pereigante ilin, ne prokrastas al
Sia malamanto, al li persone Li repagas. 11 Observu
do la ordonojn kaj la leĝojn kaj la regulojn, kiujn mi
ordonas al vi hodiaŭ, por plenumi ilin. 12 Kaj pro tio,
ke vi aŭskultos tiujn regulojn kaj observos ilin kaj
plenumos ilin, la Eternulo, via Dio, konservos al vi la
interligon kaj la favorkorecon, pri kiuj Li ĵuris al viaj
patroj; 13 kaj Li amos vin kaj benos vin kaj multigos
vin, kaj benos la frukton de via ventro kaj la frukton
de via tero, vian grenon kaj vian moston kaj vian
oleon, la frukton de viaj bovinoj kaj la frukton de viaj
ŝafinoj, sur la tero, pri kiu Li ĵuris al viaj patroj, ke Li
donos ĝin al vi. 14 Vi estos benita pli ol ĉiuj popoloj;
ne estos inter vi senfruktulo aŭ senfruktulino, ankaŭ
inter viaj brutoj. 15 Kaj la Eternulo forturnos de vi
ĉian malsanon, kaj ĉiun malbonan epidemiaĵon de
Egiptujo, kiun vi konas; Li ne metos ilin sur vin, sed
Li metos ilin sur ĉiujn viajn malamantojn. 16 Kaj vi
konsumos ĉiujn popolojn, kiujn la Eternulo, via Dio,
transdonas al vi; ne indulgu ilin via okulo, kaj vi ne
servu al iliaj dioj, ĉar tio estus falilo por vi. 17 Eble vi
diros en via koro: Tiuj popoloj estas pli grandnombraj
ol mi, kiel mi povos forpeli ilin? 18 Ne timu ilin:
memoru, kion faris la Eternulo, via Dio, al Faraono kaj
al la tuta Egiptujo, 19 la grandajn provojn, kiujn vidis
viaj okuloj, kaj la signojn kaj la miraklojn kaj la fortan
manon kaj la etenditan brakon, per kiuj elkondukis
vin la Eternulo, via Dio; tiel la Eternulo, via Dio, faros
al ĉiuj popoloj, kiujn vi timas. 20 Kaj ankaŭ krabrojn
sendos la Eternulo, via Dio, sur ilin, ĝis pereos la
restintoj, kaj tiuj, kiuj kaŝiĝis antaŭ vi. 21 Ne sentu
teruron antaŭ ili, ĉar la Eternulo, via Dio, estas inter
vi, la Dio granda kaj timinda. 22 Kaj la Eternulo, via
Dio, forpelos tiujn popolojn de antaŭ vi iom post iom;
vi ne povas ekstermi ilin rapide, por ke ne multiĝu
kontraŭ vi la sovaĝaj bestoj. 23 Kaj la Eternulo, via
Dio, transdonos ilin al vi, kaj Li tumultigos ilin antaŭ
vi per granda tumulto, ĝis ili estos ekstermitaj. 24 Kaj
Li transdonos iliajn reĝojn en viajn manojn, kaj vi
ekstermos ilian nomon el sub la ĉielo; neniu restos
stare antaŭ vi, ĝis vi ekstermos ilin. 25 La figurojn
de iliaj dioj forbruligu per fajro; ne deziru preni al
vi la arĝenton aŭ oron, kiu estas sur ili, por ke vi
ne kaptiĝu per tio; ĉar tio estas abomenaĵo por la
Eternulo, via Dio. 26 Kaj ne enportu abomenaĵon en
vian domon, por ke vi ne anatemiĝu kiel ĝi; malestimu
kaj abomenu ĝin, ĉar ĝi estas anatemaĵo.

8 Ĉiujn ordonojn, kiujn mi ordonas al vi hodiaŭ,
observu, por plenumi ilin, por ke vi vivu kaj
multiĝu, kaj venu kaj ekposedu la landon, pri kiu la
Eternulo ĵuris al viaj patroj. 2 Kaj memoru la tutan
vojon, laŭ kiu kondukis vin la Eternulo, via Dio, dum
kvardek jaroj tra la dezerto, por humiligi vin, por
elprovi vin, por sciiĝi, kio estas en via koro, ĉu vi
obeos Liajn ordonojn aŭ ne. 3 Kaj Li humiligis vin kaj
malsatigis vin, kaj nutris vin per manao, kiun vi ne
konis kaj kiun ne konis viaj patroj, por montri al vi,
ke ne per la pano sole vivas homo, sed per ĉio, kio
eliras el la buŝo de la Eternulo, homo povas vivi. 4
Via vesto ne sentaŭgiĝis sur vi kaj via piedo ne ŝvelis
dum ĉiuj kvardek jaroj. 5 Kaj sciu en via koro, ke kiel
homo instruas sian filon, tiel la Eternulo, via Dio,
instruas vin. 6 Observu do la ordonojn de la Eternulo,
via Dio, irante laŭ Liaj vojoj kaj timante Lin. 7 Ĉar la
Eternulo, via Dio, kondukas vin en landon bonan, en
landon, en kiu torentoj da akvo, fontoj, kaj lagoj eliras
el la valoj kaj el la montoj, 8 en landon de tritiko kaj
hordeo kaj vinberoj kaj figarboj kaj granatarboj, en
landon de olivarboj kaj mielo, 9 en landon, en kiu vi
manĝos panon sen neceso de ŝparado kaj en kiu nenio
al vi mankos, en landon, kies ŝtonoj estas fero kaj en

kies montoj vi elhakados kupron. 10 Kaj vi manĝos
kaj satiĝos, kaj vi benos la Eternulon, vian Dion, pro
la bona tero, kiun Li donis al vi. 11 Gardu vin, ke vi
ne forgesu la Eternulon, vian Dion, ne observante
Liajn ordonojn kaj instrukciojn kaj leĝojn, kiujn mi
ordonas al vi hodiaŭ; 12 kiam vi manĝos kaj satiĝos
kaj konstruos bonajn domojn kaj enloĝiĝos, 13 kaj
kiam viaj grandaj kaj malgrandaj brutoj multiĝos
kaj vi havos multe da arĝento kaj oro kaj via tuta
havo grandiĝos, 14 tiam ne altiĝu via koro, kaj ne
forgesu la Eternulon, vian Dion, kiu elkondukis vin
el la lando Egipta, el la domo de sklaveco; 15 kaj kiu
trakondukis vin tra la granda kaj terura dezerto, kie
estis serpentoj, aspidoj kaj skorpioj kaj sekaj lokoj
senakvaj; kaj kiu eligis por vi akvon el granita roko; 16
kaj kiu nutris vin en la dezerto per manao, kiun ne
konis viaj patroj, por humiligi vin kaj por elprovi vin,
por fari al vi bonon en la tempo estonta. 17 Ne diru
en via koro: Mia forto kaj la potenco de mia mano
akiris al mi ĉi tiun grandan havon; 18 sed memoru la
Eternulon, vian Dion, ĉar Li estas Tiu, kiu donas al vi
forton, por akiri grandan havon, por plenumi Sian
interligon, pri kiu Li ĵuris al viaj patroj, kiel vi vidas
nun. 19 Kaj mi avertas vin hodiaŭ, ke, se vi forgesos
la Eternulon, vian Dion, kaj sekvos aliajn diojn kaj
servos al ili kaj kliniĝos antaŭ ili, tiam vi pereos; 20
simile al la popoloj, kiujn la Eternulo pereigas antaŭ
vi, tiel vi pereos; pro tio, ke vi ne obeos la voĉon de la
Eternulo, via Dio.

9 Aŭskultu, ho Izrael! vi transiras nun Jordanon, por
iri kaj ekposedi popolojn, kiuj estas pli grandaj
kaj pli fortaj ol vi, urbojn grandajn kaj fortikigitajn
ĝis la ĉielo, 2 popolon grandan kaj altkreskan, la
Anakidojn, kiujn vi konas, kaj pri kiuj vi aŭdis: Kiu
povas kontraŭstari al la filoj de Anak? 3 Sciu do nun,
ke la Eternulo, via Dio, mem iras antaŭ vi, kiel fajro
konsumanta; Li ekstermos ilin kaj Li submetos ilin
antaŭ vi, kaj vi forpelos ilin kaj pereigos ilin rapide,
kiel la Eternulo diris al vi. 4 Ne diru en via koro,
kiam la Eternulo, via Dio, forpelos ilin de antaŭ vi:
Pro mia virteco la Eternulo venigis min por ekposedi
ĉi tiun landon; pro la malvirteco de ĉi tiuj popoloj
la Eternulo forpelas ilin de antaŭ vi. 5 Ne pro via
virteco kaj pro la honesteco de via koro vi venas por
ekposedi ilian landon; sed pro la malvirteco de ĉi tiuj
popoloj la Eternulo, via Dio, forpelas ilin de antaŭ vi,
kaj por plenumi tion, kion la Eternulo ĵuris al viaj
patroj, al Abraham, al Isaak, kaj al Jakob. 6 Sciu do,
ke ne pro via virteco la Eternulo, via Dio, donas al
vi tiun bonan landon por ekposedi ĝin; ĉar vi estas
popolo malmolnuka. 7 Memoru, ne forgesu, kiel vi
kolerigis la Eternulon, vian Dion, en la dezerto; de
post la tago, en kiu vi eliris el la lando Egipta, ĝis via
veno al ĉi tiu loko, vi estis malobeemaj kontraŭ la
Eternulo. 8 Kaj ĉe Ĥoreb vi incitis la Eternulon, kaj la
Eternulo ekkoleris kontraŭ vi tiel, ke Li volis ekstermi
vin. 9 Kiam mi supreniris sur la monton, por preni
la ŝtonajn tabelojn, la tabelojn de la interligo, kiun
la Eternulo faris kun vi, kaj mi restis sur la monto
kvardek tagojn kaj kvardek noktojn, panon mi ne
manĝis kaj akvon mi ne trinkis: 10 tiam la Eternulo
donis al mi la du ŝtonajn tabelojn skribitajn per la
fingro de Dio, kaj sur ili estis ĉiuj vortoj, kiujn diris al
vi la Eternulo sur la monto el meze de fajro en la tago
de kunveno. 11 Kaj tio estis post la paso de kvardek
tagoj kaj kvardek noktoj, ke la Eternulo donis al mi la
du ŝtonajn tabelojn, la tabelojn de la interligo. 12 Kaj
la Eternulo diris al mi: Leviĝu, rapide iru malsupren de
ĉi tie, ĉar malmoraliĝis via popolo, kiun vi elkondukis
el Egiptujo; rapide ili forflankiĝis de la vojo, kiun Mi
ordonis al ili: ili faris al si fanditan idolon. 13 Kaj la
Eternulo diris al mi jene: Mi vidas ĉi tiun popolon,
Mi vidas, ke ĝi estas popolo malmolnuka; 14 lasu
Min, Mi ekstermos ilin, kaj Mi forviŝos ilian nomon
el sub la ĉielo, kaj Mi faros el vi popolon pli fortan
kaj pli grandnombran ol ili. 15 Kaj mi turnis min
kaj malsupreniris de la monto, kaj la monto brulis
per fajro; kaj la du tabeloj de la interligo estis en
miaj du manoj. 16 Kaj mi vidis, ke vi pekis kontraŭ la
Eternulo, via Dio, vi faris al vi fanditan bovidon, vi
rapide forflankiĝis de la vojo, kiun la Eternulo ordonis
al vi; 17 kaj mi prenis la du tabelojn kaj forĵetis ilin
el miaj ambaŭ manoj kaj disrompis ilin antaŭ viaj
okuloj. 18 Kaj mi ĵetis min antaŭ la Eternulo, kiel
antaŭe, dum kvardek tagoj kaj kvardek noktoj mi
panon ne manĝis kaj akvon ne trinkis, pro ĉiuj viaj
pekoj, kiujn vi pekis, farante malbonon antaŭ la okuloj
de la Eternulo, kolerigante Lin; 19 ĉar mi timis la
koleron kaj furiozon, per kiuj la Eternulo ekkoleris
kontraŭ vi, dezirante ekstermi vin. Kaj la Eternulo
aŭskultis min ankaŭ ĉi tiun fojon. 20 Ankaŭ kontraŭ
Aaron la Eternulo tre ekkoleris kaj volis ekstermi lin;
sed mi preĝis ankaŭ por Aaron en tiu tempo. 21 Kaj

vian pekon, kiun vi faris, la bovidon, mi prenis kaj
forbruligis ĝin per fajro kaj disbatis ĝin, disfrakasante
tiel, ke ĝi fariĝis malgrandpeca kiel polvo, kaj mi ĵetis
ĝian polvon en la torenton, kiu defluas de la monto.
22 Ankaŭ en Tabera kaj en Masa kaj en Kibrot-Hataava
vi kolerigis la Eternulon. 23 Kaj kiam la Eternulo
sendis vin el Kadeŝ-Barnea, dirante: Iru kaj ekposedu
la landon, kiun Mi donas al vi; tiam vi malobeis la
vortojn de la Eternulo, via Dio, kaj vi ne kredis al Li
kaj ne aŭskultis Lian voĉon. 24 Malobeemaj vi estis
kontraŭ la Eternulo de la tago, kiam mi ekkonis vin.
25 Mi do kuŝis antaŭ la Eternulo dum la kvardek tagoj
kaj kvardek noktoj, kiujn mi kuŝis; ĉar la Eternulo
intencis ekstermi vin. 26 Kaj mi preĝis al la Eternulo,
kaj diris: Mia Sinjoro, ho Eternulo, ne pereigu Vian
popolon kaj Vian posedaĵon, kiun Vi liberigis per Via
grandeco kaj kiun Vi elkondukis el Egiptujo per forta
mano. 27 Rememoru Viajn servantojn Abraham, Isaak,
kaj Jakob; ne atentu la obstinecon de ĉi tiu popolo nek
ĝian malvirtecon nek ĝiajn pekojn; 28 por ke ne diru
la loĝantoj de tiu lando, el kiu Vi elkondukis nin: Pro
tio, ke la Eternulo ne povis venigi ilin en la landon, pri
kiu Li parolis al ili, kaj pro malamo al ili Li elkondukis
ilin, por mortigi ilin en la dezerto. 29 Kaj ili estas ja
Via popolo kaj Via posedaĵo, kiun Vi elkondukis per
Via granda forto kaj per Via etendita brako.

10 En tiu tempo la Eternulo diris al mi: Skulptu al vi
du ŝtonajn tabelojn kiel la antaŭaj, kaj supreniru
al Mi sur la monton, kaj faru al vi lignan keston. 2 Kaj
Mi skribos sur la tabeloj la vortojn, kiuj estis sur la
antaŭaj tabeloj, kiujn vi disrompis, kaj vi metos ilin
en la keston. 3 Tiam mi faris keston el akacia ligno,
kaj mi skulptis du ŝtonajn tabelojn kiel la antaŭaj, kaj
mi iris sur la monton, kaj la du tabeloj estis en miaj
manoj. 4 Kaj Li skribis sur la tabeloj, kiel estis skribite
antaŭe, la dek ordonojn, kiujn la Eternulo diris al vi
sur la monto el meze de la fajro en la tago de kunveno,
kaj la Eternulo donis ilin al mi. 5 Kaj mi turnis min
kaj malsupreniris de la monto, kaj metis la tabelojn
en la keston, kiun mi faris, kaj ili restis tie, kiel la
Eternulo ordonis al mi. 6 Kaj la Izraelidoj ekvojiris
de Beerot-Bene-Jaakan al Mosera; tie mortis Aaron,
kaj tie li estis enterigita; kaj lia filo Eleazar fariĝis
pastro anstataŭ li. 7 De tie ili ekvojiris al Gudgod, kaj
el Gudgod al Jotbata, en la landon, en kiu troviĝas
torentoj da akvoj. 8 En tiu tempo la Eternulo apartigis
la tribon de Levi, por porti la keston de la interligo de
la Eternulo, por stari antaŭ la Eternulo, servi al Li,
kaj beni en Lia nomo, ĝis la nuna tago. 9 Tial Levi ne
ricevis parton kaj heredan posedaĵon kun siaj fratoj:
la Eternulo estas lia heredaĵo, kiel la Eternulo, via
Dio, diris al li.) 10 Kaj mi staris sur la monto, kiel
en la antaŭa tempo, dum kvardek tagoj kaj kvardek
noktoj; kaj la Eternulo aŭskultis min ankaŭ tiun fojon:
la Eternulo ne volis pereigi vin. 11 Kaj la Eternulo
diris al mi: Leviĝu, ekvojiru antaŭ la popolo, por ke
ili venu kaj ekposedu la landon, pri kiu Mi ĵuris al
iliaj patroj, ke Mi donos ĝin al ili. 12 Kaj nun, Izrael,
kion la Eternulo, via Dio, postulas de vi? nur ke vi
timu la Eternulon, vian Dion, ke vi iru laŭ ĉiuj Liaj
vojoj, ke vi amu Lin, kaj ke vi servu al la Eternulo, via
Dio, per via tuta koro kaj per via tuta animo; 13 ke vi
observu la ordonojn de la Eternulo kaj Liajn leĝojn,
kiujn mi transdonas al vi hodiaŭ, por ke estu bone al
vi. 14 Jen al la Eternulo, via Dio, apartenas la ĉielo
kaj la ĉielo de la ĉieloj, la tero, kaj ĉio, kio estas sur
ĝi; 15 tamen nur pri viaj patroj plaĉis al la Eternulo
ekami ilin, kaj Li elektis vin, ilian idaron post ili, el
ĉiuj popoloj, kiel vi vidas nun. 16 Cirkumcidu do la
prepucion de via koro, kaj ne estu plu malmolnukaj.
17 Ĉar la Eternulo, via Dio, estas Dio de dioj kaj Sinjoro
de sinjoroj, la Dio granda, potenca, kaj timinda, kiu
ne atentas personojn kaj ne prenas subaĉeton, 18 kaj
kiu zorgas pri justeco por orfo kaj vidvino, kaj amas
fremdulon, donante al li panon kaj veston. 19 Amu
do la fremdulon; ĉar fremduloj vi estis en la lando
Egipta. 20 La Eternulon, vian Dion, timu; al Li servu
kaj al Li algluiĝu kaj per Lia nomo ĵuru. 21 Li estas
via gloro, kaj Li estas via Dio, kiu faris por vi tiujn
grandajn kaj timindajn aferojn, kiujn vidis viaj okuloj.
22 En la nombro de sepdek animoj viaj patroj foriris
en Egiptujon, kaj nun la Eternulo, via Dio, faris vin
grandnombraj kiel la steloj de la ĉielo.

11 Amu do la Eternulon, vian Dion, kaj observu Liajn
aranĝojn kaj leĝojn kaj instrukciojn kaj ordonojn
en ĉiu tempo. 2 Kaj sciu hodiaŭ, ĉar mi parolas ne
al viaj filoj, kiuj ne scias kaj ne vidis la punon de la
Eternulo, via Dio, Lian grandecon, Lian fortan manon,
kaj Lian etenditan brakon, 3 kaj Liajn signojn kaj Liajn
farojn, kiujn Li faris interne de Egiptujo al Faraono,
reĝo de Egiptujo, kaj al lia tuta lando; 4 kaj kion Li
faris al la militistaro de Egiptujo, al ĝiaj ĉevaloj kaj

ĉaroj, kiujn Li superverŝis per la akvo de la Ruĝa
Maro, kiam ili postkuris vin; kaj la Eternulo pereigis
ilin ĝis la nuna tago; 5 kaj kion Li faris al vi en la
dezerto, ĝis vi venis al ĉi tiu loko; 6 kaj kion Li faris
al Datan kaj Abiram, filoj de Eliab, filo de Ruben,
kiam la tero malfermis sian buŝon kaj englutis ilin
kaj iliajn familiojn kaj iliajn tendojn, kaj ĉion, kio
ekzistis ĉe ili, meze de la tuta Izrael. 7 Viaj okuloj
vidis ja ĉiujn grandajn farojn de la Eternulo, kiujn Li
faris. 8 Observu do ĉiujn ordonojn, kiujn mi ordonas
al vi hodiaŭ, por ke vi fortiĝu, kaj por ke vi venu kaj
ekposedu la landon, en kiun vi transiras, por ekposedi
ĝin, 9 kaj por ke vi longe vivu sur la tero, pri kiu la
Eternulo ĵuris al viaj patroj, ke Li donos ĝin al ili kaj
al ilia idaro, landon, en kiu fluas lakto kaj mielo. 10
Ĉar la lando, en kiun vi iras, por ekposedi ĝin, ne
estas kiel la lando Egipta, el kiu vi eliris, kie, seminte
vian semon, vi devis akvumi ĝin per viaj piedoj, kiel
legoman ĝardenon. 11 La lando, en kiun vi transiras,
por ekposedi ĝin, estas lando kun montoj kaj valoj; de
la pluvo ĉiela ĝi trinkas akvon; 12 lando, pri kiu zorgas
la Eternulo, via Dio; ĉiam la okuloj de la Eternulo, via
Dio, estas sur ĝi, de la komenco de la jaro ĝis la fino
de la jaro. 13 Kaj se vi obeos Miajn ordonojn, kiujn Mi
ordonas al vi hodiaŭ, amante la Eternulon, vian Dion,
kaj servante al Li per via tuta koro kaj per via tuta
animo: 14 tiam Mi donos al via lando pluvon ĝiatempe,
fruan kaj malfruan; kaj vi kolektos vian grenon kaj
vian moston kaj vian oleon. 15 Kaj Mi donos herbon
sur via kampo por via bruto; kaj vi manĝos kaj estos
sata. 16 Gardu vin, ke ne forlogiĝu via koro, kaj ke vi
ne forflankiĝu, kaj ke vi ne servu al aliaj dioj kaj ne
kliniĝu antaŭ ili. 17 Alie ekflamos kontraŭ vi la kolero
de la Eternulo, kaj Li ŝlosos la ĉielon, kaj ne estos
pluvo, kaj la tero ne donos siajn produktaĵojn, kaj vi
rapide forpereos el la bona lando, kiun la Eternulo
donas al vi. 18 Metu do ĉi tiujn miajn vortojn en vian
koron kaj en vian animon, kaj alligu ilin kiel signon
al via mano, kaj ili estu kiel memorigaĵo inter viaj
okuloj. 19 Kaj instruu ilin al viaj filoj, parolante pri
ili, kiam vi sidos en via domo kaj kiam vi iros sur
la vojo kaj kiam vi kuŝiĝos kaj kiam vi leviĝos; 20
kaj skribu ilin sur la fostoj de via domo kaj sur viaj
pordegoj; 21 por ke longiĝu via vivo kaj la vivo de
viaj infanoj sur la tero, pri kiu la Eternulo ĵuris al viaj
patroj, ke Li donos ĝin al ili, kiel longe estas la ĉielo
super la tero. 22 Se vi observos ĉiujn ĉi tiujn ordonojn,
kiujn mi ordonas al vi plenumi, amante la Eternulon,
vian Dion, irante laŭ ĉiuj Liaj vojoj, kaj algluiĝante
al Li: 23 tiam la Eternulo forpelos de antaŭ vi ĉiujn
tiujn popolojn, kaj vi ekposedos popolojn pli grandajn
kaj pli fortajn ol vi. 24 Ĉiu loko, sur kiu ekpaŝos via
piedo, fariĝos via; de la dezerto kaj Lebanon, de la
rivero, la rivero Eŭfrato, ĝis la ekstrema maro estos
viaj limoj. 25 Neniu povos kontraŭstari al vi: timon kaj
teruron antaŭ vi la Eternulo venigos sur ĉiun teron,
sur kiu vi ekpaŝos, kiel Li diris al vi. 26 Rigardu, mi
proponas al vi hodiaŭ benon kaj malbenon: 27 benon,
se vi aŭskultos la ordonojn de la Eternulo, via Dio,
kiujn mi ordonas al vi hodiaŭ; 28 kaj malbenon, se vi
ne aŭskultos la ordonojn de la Eternulo, via Dio, sed
forflankiĝos de la vojo, kiun mi ordonas al vi hodiaŭ,
kaj sekvos diojn aliajn, kiujn vi ne konas. 29 Kiam la
Eternulo, via Dio, venigos vin en la landon, en kiun vi
iras, por ekposedi ĝin, tiam vi esprimos la benon sur
la monto Gerizim kaj la malbenon sur la monto Ebal;
30 ili estas transe de Jordan, malantaŭ la vojo al la
okcidento, en la lando de la Kanaanidoj, kiuj loĝas en
la stepo, kontraŭ Gilgal, apud la kverko More. 31 Ĉar vi
transiras Jordanon, por veni ekposedi la landon, kiun
la Eternulo, via Dio, donas al vi, kaj vi ekposedos ĝin
kaj ekloĝos en ĝi. 32 Observu do, ke vi plenumu ĉiujn
leĝojn kaj instrukciojn, kiujn mi donas al vi hodiaŭ.

**12** Jen estas la leĝoj kaj reguloj, kiujn vi devas
observi por plenumi en la lando, kiun la Eternulo,
la Dio de viaj patroj, donas al vi kiel posedaĵon, dum
la tuta tempo, kiun vi vivos sur la tero. 2 Ekstermu
ĉiujn lokojn, kie la popoloj, kiujn vi ekposedos, servis
al siaj dioj sur la altaj montoj kaj sur la montetoj
kaj sub ĉiu verda arbo. 3 Kaj detruu iliajn altarojn,
kaj rompu iliajn monumentojn, kaj iliajn sanktajn
stangojn forbruligu per fajro, kaj la figurojn de iliaj
dioj disbatu, kaj ekstermu ilian nomon de tiu loko.
4 Ne faru tiele al la Eternulo, via Dio; 5 sed al la
loko, kiun elektos la Eternulo, via Dio, inter ĉiuj
viaj triboj, por meti tien Sian nomon, al Lia loĝejo
direktu vin kaj venu tien, 6 kaj tien alportu viajn
bruloferojn kaj viajn buĉoferojn kaj viajn dekonaĵojn
kaj la oferdonojn de viaj manoj kaj viajn promesitaĵojn
kaj viajn memvolajn oferojn kaj la unuenaskitojn el
viaj grandaj kaj malgrandaj brutoj. 7 Kaj manĝu tie
antaŭ la Eternulo, via Dio, kaj estu gajaj, vi kaj viaj
familioj, en ĉiu entrepreno de viaj manoj, per kiu benis

vin la Eternulo, via Dio. 8 Ne faru simile al ĉio, kion ni
faras ĉi tie hodiaŭ, ĉiu tion, kio plaĉas al li; 9 ĉar vi
nun ankoraŭ ne venis al la ripozo kaj al la posedaĵo,
kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi. 10 Sed kiam vi
transiros Jordanon kaj ekloĝos en la lando, kiun la
Eternulo, via Dio, posedigas al vi, kaj Li ripozigos vin
de ĉiuj viaj malamikoj ĉirkaŭe kaj vi loĝos sendanĝere:
11 tiam sur la lokon, kiun elektos la Eternulo, via
Dio, por loĝigi tie Sian nomon, tien alportu ĉion,
kion mi ordonas al vi: viajn bruloferojn kaj viajn
buĉoferojn, viajn dekonaĵojn kaj la oferdonojn de viaj
manoj, kaj ĉion elektitan laŭ viaj promesoj, kiujn vi
promesis al la Eternulo; 12 kaj estu gajaj antaŭ la
Eternulo, via Dio, vi kaj viaj filoj kaj viaj filinoj kaj
viaj servantoj kaj viaj servantinoj, kaj la Levido, kiu
estas inter viaj pordegoj, ĉar li ne havas parton kaj
posedaĵon kun vi. 13 Gardu vin, ke vi ne alportu viajn
bruloferojn sur ĉiu loko, kiun vi vidos; 14 nur sur
tiu loko, kiun elektos la Eternulo, inter unu el viaj
triboj, tie alportu viajn bruloferojn, kaj tie faru ĉion,
kion mi ordonas al vi. 15 Tamen, kiom deziros via
animo, vi povas buĉi kaj manĝi viandon laŭ la beno
de la Eternulo, via Dio, kiun Li donos al vi en ĉiuj viaj
urboj; purulo kaj malpurulo povas manĝi ĝin, kiel
gazelon aŭ cervon. 16 Nur la sangon ne manĝu; sur la
teron elverŝu ĝin, kiel akvon. 17 Vi ne devas manĝi en
viaj urboj la dekonaĵon el via greno kaj el via mosto
kaj el via oleo, kaj la unuenaskitojn el viaj grandaj
kaj malgrandaj brutoj, kaj ĉiujn viajn promesitaĵojn,
kiujn vi promesos, kaj viajn memvolajn oferojn kaj
la oferdonojn de viaj manoj; 18 sed nur antaŭ la
Eternulo, via Dio, manĝu tion sur la loko, kiun elektos
la Eternulo, via Dio, vi kaj via filo kaj via filino kaj via
servanto kaj via servantino, kaj la Levido, kiu estas
inter viaj pordegoj; kaj estu gajaj antaŭ la Eternulo,
via Dio, en ĉiu entrepreno de viaj manoj. 19 Gardu
vin, ke vi ne forlasu la Levidon dum via tuta vivo
sur via tero. 20 Kiam la Eternulo, via Dio, vastigos
viajn limojn, kiel Li diris al vi, kaj vi diros: Mi manĝos
viandon — ĉar via animo ekdeziros manĝi viandon:
tiam laŭ la tuta deziro de via animo manĝu viandon.
21 Se estos malproksima de vi tiu loko, kiun elektos
la Eternulo, via Dio, por meti tien Sian nomon, tiam
buĉu el viaj grandaj kaj malgrandaj brutoj, kiujn la
Eternulo donis al vi, kiel mi ordonis al vi, kaj manĝu
en viaj urboj laŭ la tuta deziro de via animo. 22 Sed
manĝu tion tiel, kiel oni manĝas gazelon kaj cervon;
malpurulo kaj purulo egale povas tion manĝi. 23 Nur
detenu vin, ke vi ne manĝu la sangon; ĉar la sango
estas la animo, kaj vi ne devas manĝi la animon kun
la viando; 24 ne manĝu ĝin, sur la teron elverŝu ĝin,
kiel akvon; 25 ne manĝu ĝin, por ke estu bone al vi kaj
al viaj idoj post vi, se vi faros plaĉantaĵon antaŭ la
okuloj de la Eternulo. 26 Sed viajn sanktaĵojn, kiujn vi
havos, kaj viajn promesitaĵojn portu, kaj venu sur la
lokon, kiun elektos la Eternulo. 27 Kaj oferfaru viajn
bruloferojn, la viandon kaj la sangon, sur la altaro de
la Eternulo, via Dio; sed la sango de viaj buĉoferoj
estu elverŝata sur la altaron de la Eternulo, via Dio,
kaj la viandon vi povas manĝi. 28 Observu kaj obeu
ĉiujn ĉi tiujn vortojn, kiujn mi ordonas al vi, por ke
estu bone al vi kaj al viaj idoj post vi eterne, se vi
faros tion, kio estas bona kaj plaĉa antaŭ la okuloj
de la Eternulo, via Dio. 29 Kiam la Eternulo, via Dio,
ekstermos de antaŭ vi la popolojn, al kiuj vi iras,
por forpeli ilin, kaj vi forpelos ilin kaj ekloĝos en ilia
lando: 30 tiam gardu vin, ke vi ne enretiĝu per ili, post
kiam ili estos ekstermitaj de antaŭ vi, kaj ke vi ne
serĉu iliajn diojn, dirante: Kiel ĉi tiuj popoloj servis al
siaj dioj, tiel mi ankaŭ faros. 31 Ne agu tiel koncerne
la Eternulon, vian Dion; ĉar ĉion, kion abomenas la
Eternulo, kion Li malamas, ili faras por siaj dioj, kaj eĉ
siajn filojn kaj filinojn ili forbruligas per fajro al siaj
dioj. 32 Ĉion, kion mi ordonas al vi, tion observu, ke vi
ĝin plenumu; ne aldonu al tio, kaj ne deprenu de tio.

## 13
Se aperos inter vi profeto aŭ sonĝisto kaj
prezentos al vi signon aŭ miraklon, 2 kaj
plenumiĝos la signo aŭ miraklo, pri kiu li parolis al vi,
kaj li diros: Ni sekvu aliajn diojn, kiujn vi ne konas,
kaj ni servu al ili: 3 tiam ne aŭskultu la vortojn de tiu
profeto aŭ de tiu sonĝisto, ĉar tiam elprovas vin la
Eternulo, via Dio, por sciiĝi, ĉu vi amas la Eternulon,
vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo. 4
La Eternulon, vian Dion, sekvu, kaj Lin timu, kaj Liajn
ordonojn observu, kaj Lian voĉon aŭskultu, kaj al Li
servu, kaj al Li alteniĝu. 5 Kaj tiun profeton aŭ tiun
sonĝiston oni devas mortigi; ĉar li predikis defalon de
la Eternulo, via Dio, kiu elkondukis vin el la lando
Egipta kaj liberigis vin el la domo de sklaveco — por
delogi vin de la vojo, laŭ kiu la Eternulo, via Dio,
ordonis al vi iri; kaj ekstermu la malbonon el inter vi.
6 Se logos vin sekrete via frato, filo de via patrino,
aŭ via filo, aŭ via filino, aŭ la edzino en viaj brakoj,
aŭ via amiko plej intima, dirante: Ni iru kaj servu

al aliaj dioj, kiujn ne konis vi nek viaj patroj, 7 el la
dioj de la popoloj, kiuj estas ĉirkaŭ vi, la proksimaj
de vi aŭ la malproksimaj de vi, de unu fino de la
lando ĝis la alia: 8 tiam ne konsentu kun li kaj ne
aŭskultu lin; ne indulgu lin via okulo, ne kompatu
kaj ne kaŝu lin, 9 sed mortigu lin; via mano devas
esti sur li la unua, por mortigi lin, kaj la manoj de la
tuta popolo poste. 10 Kaj ĵetu sur lin ŝtonojn, ke li
mortu; ĉar li volis forlogi vin de la Eternulo, via Dio,
kiu elkondukis vin el la lando Egipta, el la domo de
sklaveco. 11 Kaj la tuta Izrael tion aŭdos kaj ektimos,
kaj oni ne plu faros tian malbonan agon inter vi. 12
Se vi aŭdos pri iu el viaj urboj, kiujn la Eternulo, via
Dio, donas al vi por loĝado, ke oni diras: 13 Eliris el
inter vi homoj sentaŭgaj kaj forlogis la loĝantojn de
sia urbo, dirante: Ni iru kaj servu al aliaj dioj, kiujn
vi ne konis; 14 kaj vi serĉos kaj esploros kaj bone
pridemandos; kaj montriĝos, ke tio estas preciza vero,
ke la abomenaĵo estas farita inter vi: 15 tiam mortigu
la loĝantojn de tiu urbo per glavo, detruu ĝin, kaj ĉion,
kio estas en ĝi, kaj ankaŭ ĝiajn brutojn mortigu per
glavo. 16 Kaj ĝian tutan havon kolektu sur la mezon
de placo, kaj forbruligu per fajro la urbon kaj ĝian
tutan havon, absolute ĉion, al la Eternulo, via Dio; kaj
ĝi estu eterna ruino, oni neniam ĝin rekonstruu. 17
Kaj nenio el la anatemaĵo algluiĝu al via mano, por ke
la Eternulo forlasu Sian flaman koleron kaj donu al vi
favorkorecon kaj indulgu vin kaj multigu vin, kiel Li
ĵuris al viaj patroj, 18 se vi aŭskultos la voĉon de la
Eternulo, via Dio, observante ĉiujn Liajn ordonojn,
kiujn mi ordonas al vi hodiaŭ, farante plaĉantaĵon
antaŭ la okuloj de la Eternulo, via Dio.

**14** Vi estas filoj de la Eternulo, via Dio: ne faru sur
vi entranĉojn kaj ne faru senharaĵon super viaj
okuloj pro mortinto; 2 ĉar vi estas popolo sankta
al la Eternulo, via Dio, kaj vin la Eternulo elektis,
ke vi estu Lia popolo propra, el ĉiuj popoloj, kiuj
estas sur la tero. 3 Nenian abomenaĵon manĝu. 4
Jen estas la brutoj, kiujn vi povas manĝi: bovo, ŝafo,
kaj kapro, 5 cervo kaj gazelo kaj kapreolo kaj ibekso
kaj antilopo kaj uro kaj tragelafo. 6 Ĉian bruton, kiu
havas disfenditajn hufojn kaj distranĉan sulkon inter
la du duonhufoj kaj kiu remaĉas maĉitaĵon, tian el la
brutoj vi povas manĝi. 7 Nur ĉi tiujn ne manĝu el la
remaĉantaj maĉitaĵon kaj el la havantaj disfenditajn
hufojn kun distranĉa sulko: la kamelon kaj la leporon
kaj la hirakon; ĉar ili remaĉas maĉitaĵon, sed iliaj
hufoj ne estas disfenditaj, malpuraj ili estas por vi; 8
kaj la porkon, ĉar ĝiaj hufoj estas disfenditaj, sed ĝi
ne remaĉas maĉitaĵon, malpura ĝi estas por vi; ilian
viandon ne manĝu, kaj ilian kadavron ne ektuŝu. 9
Ĉi tiujn vi povas manĝi el ĉiuj bestoj, kiuj estas en
la akvo: ĉiujn, kiuj havas naĝilojn kaj skvamojn, vi
povas manĝi; 10 sed ĉiujn, kiuj ne havas naĝilojn kaj
skvamojn, ne manĝu: malpura tio estas por vi. 11 Ĉian
birdon puran vi povas manĝi. 12 Sed ĉi tiujn el ili ne
manĝu: la aglon kaj la gipaeton kaj la pandionon 13 kaj
la vulturon kaj la falkon kaj la milvon kun ĝia speco
14 kaj ĉian korvon kun ĝia speco 15 kaj la struton
kaj la strigon kaj la mevon kaj la akcipitron kun ĝia
speco, 16 la noktuon kaj la ibison kaj la cignon 17 kaj la
pelikanon kaj la perknopteron kaj la mergulon 18 kaj
la cikonion kaj la ardeon kun ĝia speco kaj la upupon
kaj la vesperton. 19 Kaj ĉia rampaĵo flugilhava estas
por vi malpura; oni ne devas ilin manĝi. 20 Ĉian puran
birdon vi povas manĝi. 21 Manĝu nenian kadavraĵon;
al la fremdulo, kiu estas en via urbo, vi povas ĝin
doni, ke li ĝin manĝu; aŭ vi povas vendi al alilandulo;
ĉar vi estas popolo sankta al la Eternulo, via Dio. Ne
kuiru kapridon en la lakto de ĝia patrino. 22 Apartigu
dekonaĵon el ĉiuj produktaĵoj de via semado, kiuj
venas de la kampo ĉiujare. 23 Kaj manĝu antaŭ la
Eternulo, via Dio, sur la loko, kiun Li elektos, por loĝigi
tie Sian nomon, dekonaĵon el via greno, el via mosto,
kaj el via oleo, kaj la unuenaskitojn el viaj grandaj
kaj malgrandaj brutoj; por ke vi lernu timi ĉiam la
Eternulon, vian Dion. 24 Kaj se tro longa estos por
vi la vojo kaj vi ne povos porti, ĉar tro malproksima
estos de vi la loko, kiun elektos la Eternulo, via Dio,
por meti tien Sian nomon, kaj la Eternulo, via Dio,
vin benis: 25 tiam vi povas tion monigi, kaj vi prenos
la monon en vian manon, kaj iros al la loko, kiun la
Eternulo, via Dio, elektos; 26 kaj vi aĉetos pro tiu
mono ĉion, kion ekdeziros via animo, el grandaj aŭ
malgrandaj brutoj, el vino aŭ el drinkaĵo, aŭ el ĉio,
kion postulos via animo; kaj vi manĝos tie antaŭ la
Eternulo, via Dio, kaj vi estos gajaj, vi kaj via familio.
27 Kaj la Levidon, kiu estas en via urbo, ne forlasu;
ĉar li ne havas parton kaj heredaĵon ĉe vi. 28 Post
paso de tri jaroj apartigu la tutan dekonaĵon de viaj
produktaĵoj de tiu jaro kaj metu tion ĉe viaj pordegoj;
29 kaj venos la Levido — ĉar li ne havas parton kaj
heredaĵon ĉe vi — kaj la fremdulo kaj la orfo kaj la

vidvino, kiuj estas en via urbo, kaj ili manĝos kaj
satiĝos; por ke benu vin la Eternulo, via Dio, en ĉiu
faro de viaj manoj, kiun vi faros.

**15** Post paso de sep jaroj faru forlason. 2 Jen
estas la esenco de la forlaso: ĉiu kreditoro, kiu
pruntedonis ion al sia proksimulo, forlasu tion, li ne
postulu tion de sia proksimulo aŭ de sia frato; ĉar estas
proklamita forlaso pro la Eternulo. 3 De alilandulo vi
povas postuli; sed kion vi havos ĉe via frato, tion via
mano forlasu. 4 Cetere ne estos ĉe vi malriĉulo (ĉar la
Eternulo benos vin en la lando, kiun la Eternulo, via
Dio, donas al vi kiel heredan posedaĵon), 5 se vi nur
obeos la voĉon de la Eternulo, via Dio, por observi kaj
plenumi ĉiujn ĉi tiujn ordonojn, kiujn mi ordonas al
vi hodiaŭ. 6 Ĉar la Eternulo, via Dio, benos vin, kiel
Li diris al vi; kaj vi pruntedonos al multaj popoloj,
sed vi ne prunteprenos; kaj vi regos super multaj
popoloj, sed super vi ili ne regos. 7 Se estos inter
vi malriĉulo iu el viaj fratoj en iu el viaj urboj en
via lando, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi, tiam
ne malmoligu vian koron kaj ne fermu vian manon
antaŭ via frato, la malriĉulo; 8 sed malfermu al li
vian manon, kaj pruntedonu al li laŭmezure de lia
manko, kio mankos al li. 9 Gardu vin, ke ne aperu en
via koro malpia penso: Alproksimiĝas la sepa jaro,
la jaro de forlaso; kaj via okulo fariĝos malfavora
kontraŭ via malriĉa frato kaj vi ne donos al li, kaj
li plendos pri vi al la Eternulo, kaj peko estos sur
vi. 10 Donu al li, kaj ne ĉagrenu vin via koro, kiam
vi donos al li; ĉar pro tio benos vin la Eternulo, via
Dio, en ĉiuj viaj faroj kaj en ĉiu entrepreno de via
mano. 11 Ĉar ne mankos malriĉuloj en la lando, tial
mi ordonas al vi jene: malfermu vian manon al via
frato, al via senhavulo, kaj al via malriĉulo en via
lando. 12 Se vendos sin al vi via frato, Hebreo aŭ
Hebreino, li servu vin dum ses jaroj, sed en la sepa
jaro forsendu lin de vi en libereco. 13 Kaj kiam vi
forsendos lin de vi en libereco, ne forsendu lin kun
malplenaj manoj; 14 sed havigu al li iom el viaj brutoj
kaj el via garbejo kaj el via vinpremejo; per kio benis
vin la Eternulo, via Dio, tion donu al li. 15 Memoru, ke
vi estis sklavo en la lando Egipta, kaj la Eternulo, via
Dio, liberigis vin; tial mi ordonas al vi tion hodiaŭ. 16
Kaj se li diros al vi: Mi ne foriros de vi, ĉar mi amas
vin kaj vian domon — ĉar estas al li bone ĉe vi: 17
tiam prenu alenon kaj enpiku en lian orelon kaj en la
pordon, kaj li estos sklavo al vi por ĉiam. Ankaŭ kun
via sklavino agu tiel. 18 Tio ne ŝajnu al vi malfacila,
kiam vi forsendos lin de vi en libereco; ĉar duoblan
pagon de dungito li perlaboris ĉe vi dum ses jaroj; kaj
la Eternulo, via Dio, benos vin en ĉio, kion vi faros.
19 Ĉiun virseksan unuenaskiton, kiu naskiĝos al viaj
grandaj kaj malgrandaj brutoj, dediĉu al la Eternulo,
via Dio; ne laboru per la unuenaskito de via bovo,
kaj ne tondu la unuenaskiton de via ŝafo. 20 Antaŭ
la Eternulo, via Dio, manĝu ĝin ĉiujare, sur la loko,
kiun elektos la Eternulo, vi kaj via familio; 21 sed se ĝi
havos ian difekton, se ĝi estos lama aŭ blinda, aŭ se ĝi
havos kian ajn malbonan difekton, tiam ne buĉu ĝin
ofere al la Eternulo, via Dio. 22 Sed inter viaj pordegoj
vi povas ĝin manĝi, malpurulo kaj purulo egale, kiel
gazelon kaj cervon. 23 Nur ĝian sangon ne manĝu; sur
la teron elverŝu ĝin, kiel akvon.

**16** Observu la monaton Abib, kaj faru Paskon al
la Eternulo, via Dio; ĉar en la monato Abib
elkondukis vin la Eternulo, via Dio, el Egiptujo en
la nokto. 2 Kaj buĉu Paskon al la Eternulo, via Dio,
el grandaj kaj malgrandaj brutoj, sur la loko, kiun
la Eternulo elektos, por loĝigi tie Sian nomon. 3 Ne
manĝu kun tio fermentintaĵon; dum sep tagoj manĝu
kun tio macojn, panon de mizero — ĉar rapidece vi
eliris el la lando Egipta — por ke vi memoru dum
la tuta tempo de via vivo la tagon de via eliro el la
lando Egipta. 4 Oni ne vidu ĉe vi fermentintaĵon en
via tuta limitaĵo dum sep tagoj; kaj el la viando, kiun
vi oferbuĉos vespere en la unua tago, neniom restu
ĝis la mateno. 5 Vi ne povas buĉi la Paskon en iu el la
urboj, kiujn la Eternulo, via Dio, donos al vi; 6 nur sur
la loko, kiun elektos la Eternulo, via Dio, por loĝigi tie
Sian nomon, buĉu la Paskon vespere, ĉe la subiro de la
suno — tempo de via eliro el Egiptujo. 7 Kaj kuiru kaj
manĝu sur tiu loko, kiun elektos la Eternulo, via Dio;
kaj en la sekvanta tago vi povas vin turni kaj iri al viaj
tendoj. 8 Dum ses tagoj manĝu macojn, kaj en la sepa
tago estu sankta kunveno antaŭ la Eternulo, via Dio;
ne faru laboron. 9 Sep semajnojn kalkulu al vi; de post
la apero de la rikoltilo en la spikoj komencu kalkuli la
sep semajnojn. 10 Kaj faru feston de semajnoj al la
Eternulo, via Dio, kun libervola dono el via mano, kiun
vi donos konforme al tio, kiom benis vin la Eternulo,
via Dio. 11 Kaj estu gajaj antaŭ la Eternulo, via Dio,
vi kaj via filo kaj via filino kaj via servanto kaj via

servantino, kaj la Levido, kiu estas en viaj pordegoj,
kaj la fremdulo kaj la orfo kaj la vidvino, kiuj estas
inter vi, sur la loko, kiun elektos la Eternulo, via Dio,
por loĝigi tie Sian nomon. 12 Kaj memoru, ke vi estis
sklavo en Egiptujo; kaj observu kaj plenumu ĉi tiujn
leĝojn. 13 Feston de laŭboj faru al vi dum sep tagoj,
kiam vi kolektos el via draŝejo kaj el via vinpremejo.
14 Kaj estu gajaj en via festo, vi kaj via filo kaj via filino
kaj via servanto kaj via servantino, kaj la Levido kaj la
fremdulo kaj la orfo kaj la vidvino, kiuj estas inter viaj
pordegoj. 15 Dum sep tagoj festu al la Eternulo, via
Dio, sur la loko, kiun elektos la Eternulo; ĉar benos
vin la Eternulo, via Dio, en ĉiuj viaj produktaĵoj kaj en
ĉiuj faroj de viaj manoj, kaj vi estos tute gaja. 16 Tri
fojojn en la jaro ĉiu via virseksulo devas aperi antaŭ
la Eternulo, via Dio, sur la loko, kiun Li elektos: en
la festo de macoj kaj en la festo de semajnoj kaj en
la festo de laŭboj; kaj li ne aperu antaŭ la Eternulo
kun malplenaj manoj; 17 ĉiu kun donaco en sia mano,
konforme al la beno de la Eternulo, via Dio, kiun Li
donis al vi. 18 Juĝistojn kaj kontrolistojn starigu al vi
en ĉiuj viaj urboj, kiujn la Eternulo, via Dio, donos
al vi laŭ viaj triboj; kaj ili juĝu la popolon per juĝo
justa. 19 Ne klinu la leĝon, ne atentu personojn; kaj ne
prenu subaĉeton, ĉar subaĉeto blindigas la okulojn de
saĝuloj kaj konfuzas la aferojn de justuloj. 20 Justecon,
justecon sekvu, por ke vi vivu kaj posedu la landon,
kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi. 21 Ne plantu
al vi sanktan stangon el ia arbo apud la altaro de la
Eternulo, via Dio, kiun vi faros al vi; 22 kaj ne starigu
al vi statuon, kion malamas la Eternulo, via Dio.

**17** Ne oferbuĉu al la Eternulo, via Dio, bovon
aŭ ŝafon, kiu havas sur si difekton, kian ajn
malbonaĵon; ĉar tio estas abomenaĵo por la Eternulo,
via Dio. 2 Se troviĝos inter vi en iu el viaj urboj, kiujn
la Eternulo, via Dio, donas al vi, viro aŭ virino, kiu
faras malbonon antaŭ la Eternulo, via Dio, malobeante
Lian interligon; 3 kaj li iros kaj servos al aliaj dioj,
kaj adorkliniĝos antaŭ ili aŭ antaŭ la suno aŭ antaŭ
la luno aŭ antaŭ la tuta armeo de la ĉielo, kion
mi ne ordonis; 4 kaj estos dirite al vi, kaj vi aŭdos
kaj bone esploros, kaj montriĝos, ke la afero estas
preciza vero, ke tiu abomenaĵo estas farita en Izrael: 5
tiam elkonduku tiun viron aŭ tiun virinon, kiuj faris
tiun malbonan aferon, al via pordego, la viron aŭ la
virinon, kaj ĵetu sur ilin ŝtonojn, ke ili mortu. 6 Laŭ la
akuzo de du atestantoj aŭ tri atestantoj la mortigoto
estu ekzekutita; li ne estu mortigita laŭ la akuzo de
unu atestanto. 7 La mano de la atestantoj estu sur li
plej antaŭe, por mortigi lin, kaj la mano de la tuta
popolo poste; tiel ekstermu la malbonon el inter vi. 8
Se estos por vi tro malfacila ia juĝa afero inter sango
kaj sango, inter proceso kaj proceso, inter frapo kaj
frapo, en disputaj aferoj en via urbo: tiam leviĝu, kaj
iru al la loko, kiun elektos la Eternulo, via Dio; 9 kaj
venu al la pastroj Levidoj, kaj al la juĝisto, kiu estos
en tiu tempo, kaj demandu, kaj ili diros al vi la juĝan
decidon. 10 Kaj agu laŭ la vorto, kiun ili diros al vi de
tiu loko, kiun la Eternulo elektos; kaj observu, ke vi
faru ĉion, kion ili instruos al vi. 11 Laŭ la instruo, kiun
ili donos al vi, kaj laŭ la decido, kiun ili diros al vi,
agu; de tio, kion ili diros al vi, ne dekliniĝu dekstren
nek maldekstren. 12 Kiu agos arogante, kaj ne obeos la
pastron, kiu staras tie, por servi al la Eternulo, via Dio,
aŭ la juĝiston, tiu homo devas morti; kaj vi ekstermos
la malbonon el Izrael. 13 Kaj la tuta popolo aŭdos kaj
ektimos, kaj ili ne plu agos arogante. 14 Kiam vi venos
en la landon, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi,
kaj vi ekposedos ĝin kaj ekloĝos en ĝi, kaj diros: Mi
starigos super mi reĝon, kiel ĉiuj popoloj ĉirkaŭ mi: 15
tiam starigu super vi reĝon, kiun elektos la Eternulo,
via Dio; el inter viaj fratoj starigu super vi reĝon; vi
ne povas starigi super vi homon aligentan, kiu ne
estas via frato. 16 Sed li ne multigu al si ĉevalojn, kaj
li ne revenigu la popolon en Egiptujon, por multigi
ĉevalojn; la Eternulo diris al vi: Ne iru plu returne laŭ
tiu vojo. 17 Kaj li ne multigu al si edzinojn, por ke
ne dekliniĝu lia koro; kaj arĝenton kaj oron li ne tro
multigu al si. 18 Sed kiam li sidiĝos sur la trono de sia
regno, li transskribu al si kopion de ĉi tiu instruo en
libron laŭ tio, kio troviĝas ĉe la pastroj Levidoj; 19 kaj
ĝi estu ĉe li, kaj li legadu en ĝi dum sia tuta vivo, por
ke li lernu timi la Eternulon, sian Dion, observante
ĉiujn vortojn de ĉi tiu instruo kaj ĉi tiujn leĝojn, por
plenumi ilin; 20 por ke ne altiĝu lia koro super liaj
fratoj kaj por ke li ne dekliniĝu de la ordono dekstren
nek maldekstren, por ke li restu longe en sia reĝeco,
li kaj liaj filoj, inter Izrael.

**18** Ne havos la pastroj Levidoj, la tuta tribo de Levi,
parton kaj heredaĵon kun Izrael: la fajroferojn
de la Eternulo kaj Lian apartenaĵon ili manĝados. 2
Heredaĵon ili ne havos inter siaj fratoj: la Eternulo

estas ilia heredaĵo, kiel Li diris al ili. 3 Jen estas tio,
kion devas doni al la pastroj la popolo, la oferbuĉantoj
de bovo aŭ ŝafo: oni donu al la pastro la ŝultron kaj
la makzelojn kaj la stomakon; 4 la unuaaĵon de via
greno, de via mosto, kaj de via oleo, kaj la unuaaĵon
de la tonditaĵo de viaj ŝafoj donu al li. 5 Ĉar lin elektis
la Eternulo, via Dio, el ĉiuj viaj triboj, ke li staru kaj
servu en la nomo de la Eternulo, li kaj liaj filoj en ĉiu
tempo. 6 Kaj se venos Levido el iu el viaj urboj, el la
tuta Izrael, kie li loĝas, kaj li venos pro la tuta deziro
de sia animo al la loko, kiun elektos la Eternulo, 7 kaj
li servos en la nomo de la Eternulo, lia Dio, kiel ĉiuj
liaj fratoj, la Levidoj, kiuj staras tie antaŭ la Eternulo:
8 tiam ili manĝu egalajn partojn, krom tio, kion donas
al li la vendo de la patra havo. 9 Kiam vi venos en la
landon, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi, tiam ne
lernu fari ion similan al la abomenaĵoj de tiuj popoloj:
10 ne devas troviĝi inter vi iu, kiu trairigas sian filon
aŭ filinon tra fajro, aŭguristo, antaŭdiristo, magiisto,
sorĉisto, 11 nek subĵurigisto, nek elvokisto de spiritoj,
nek signoklarigisto, nek esploristo de mortintoj; 12
ĉar abomenaĵo por la Eternulo estas ĉiu, kiu faras tion,
kaj pro tiuj abomenaĵoj la Eternulo, via Dio, forpelas
ilin de antaŭ vi. 13 Senmakula estu antaŭ la Eternulo,
via Dio; 14 ĉar tiuj popoloj, kiujn vi forpelas, aŭskultas
antaŭdiristojn kaj aŭguristojn; sed al vi ne tion donis
la Eternulo, via Dio. 15 Profeton al via mezo, el viaj
fratoj, similan al mi, starigos por vi la Eternulo, via
Dio; lin aŭskultu, 16 konforme al tio, kion vi petis de la
Eternulo, via Dio, ĉe Ĥoreb en la tago de la kunveno,
dirante: Mi ne aŭdu plu la voĉon de la Eternulo, mia
Dio, kaj ĉi tiun grandan fajron mi ne vidu plu, por ke
mi ne mortu. 17 Kaj la Eternulo diris al mi: Bona estas
tio, kion ili diris. 18 Profeton Mi starigos por ili el la
mezo de iliaj fratoj, similan al vi; kaj Mi metos Miajn
vortojn en lian buŝon, kaj li parolos al ili ĉion, kion Mi
ordonos al li. 19 Kaj se iu homo ne aŭskultos Miajn
vortojn, kiujn li parolos en Mia nomo, tiun Mi punos.
20 Sed profeton, kiu arogos diri en Mia nomo ion, kion
Mi ne ordonis al li diri, aŭ kiu parolos en la nomo de
aliaj dioj, tiun profeton oni mortigu. 21 Kaj se vi diros
en via koro: Kiel ni ekkonos la vorton, kiun ne diris la
Eternulo? 22 Kion la profeto diros en la nomo de la
Eternulo kaj la afero ne fariĝos kaj ne plenumiĝos
— tio estas la vortoj, kiujn la Eternulo ne diris; pro
aroganteco diris tion la profeto; ne timu lin.

19 Kiam la Eternulo, via Dio, ekstermos la popolojn,
kies landon la Eternulo, via Dio, donas al vi,
kaj vi forpelos ilin kaj ekloĝos en iliaj urboj kaj en
iliaj domoj: 2 tiam apartigu el vi tri urbojn en via
lando, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi kiel
posedaĵon. 3 Aranĝu al vi la vojon, kaj dividu en tri
partojn la spacon de via lando, kiun havigos al vi la
Eternulo, via Dio; kaj ili estos por tio, ke tien forkuru
ĉiu mortiginto. 4 Kaj jen estas la afero pri mortiginto,
kiu povas forkuri tien kaj resti vivanta: se iu mortigos
sian proksimulon senintence, ne estinte lia malamiko
antaŭe; 5 aŭ se iu iros kun sia proksimulo en arbaron,
por haki lignon, kaj eksvingiĝos lia mano kun la
hakilo, por haki la arbon, kaj la fero desaltos de la
tenilo kaj trafos la proksimulon kaj tiu mortos — li
forkuru al unu el tiuj urboj, por resti vivanta; 6 por ke
ne postkuru la sangovenĝanto la mortiginton, kiam
ekflamos lia koro, kaj ne kuratingu lin, se la vojo estos
longa, kaj ne mortigu lin; ĉar li ne meritas morton,
ĉar li ne estis lia malamiko antaŭe. 7 Tial mi ordonas
al vi, dirante: Tri urbojn apartigu al vi. 8 Kaj kiam
la Eternulo, via Dio, plilarĝigos viajn limojn, kiel Li
ĵuris al viaj patroj, kaj donos al vi la tutan landon,
kiun Li promesis doni al viaj patroj; 9 se ĉiujn ĉi tiujn
ordonojn, kiujn mi donas al vi hodiaŭ, vi observos kaj
plenumos, amante la Eternulon, vian Dion, kaj irante
laŭ Liaj vojoj en ĉiu tempo: tiam aldonu al vi ankoraŭ
tri urbojn krom tiuj tri; 10 por ke ne estu verŝata
senkulpa sango meze de via lando, kiun la Eternulo,
via Dio, donas al vi kiel posedaĵon, kaj por ke vi ne
estu kulpa pri sango. 11 Sed se iu estos malamiko al sia
proksimulo kaj insidos lin kaj leviĝos kontraŭ lin kaj
mortigos lin kaj forkuros al unu el tiuj urboj: 12 tiam
la plejaĝuloj en lia urbo sendu kaj prenigu lin el tie
kaj transdonu lin en la manon de la sangovenĝanto,
por ke li mortu. 13 Via okulo ne indulgu lin; forviŝu la
sangon de senkulpulo el Izrael, kaj estos al vi bone. 14
Ne forŝovu la limon de via proksimulo, kiun difinis la
antaŭuloj en via posedaĵo, kiun vi ricevos en la lando,
kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi kiel posedaĵon. 15
Ne valoras unu atestanto kontraŭ homo en ĉia kulpo,
en ĉia krimo, kaj en ĉia peko, kiun li pekos: laŭ la
diro de du atestantoj aŭ laŭ la diro de tri atestantoj
oni povas fari proceson. 16 Se kontraŭ iu stariĝos
atestanto maljusta, akuzante lin pri krimo, 17 tiam la
du homoj, kiuj havas inter si juĝan disputon, stariĝu
antaŭ la Eternulo, antaŭ la pastroj kaj la juĝistoj, kiuj

estos en tiu tempo; 18 kaj la juĝistoj bone esploru; kaj
se montriĝos, ke la atestanto estas atestanto malvera,
ke li akuzis malvere sian fraton: 19 tiam agu kun li tiel,
kiel li intencis agi kun sia frato; kaj tiel ekstermu la
malbonon el inter vi. 20 Kaj la aliaj aŭdos kaj ektimos,
kaj ili ne faros plu tian malbonon inter vi. 21 Kaj via
okulo ne indulgu: animon pro animo, okulon pro
okulo, denton pro dento, manon pro mano, piedon
pro piedo.

20 Kiam vi iros milite kontraŭ vian malamikon kaj vi
vidos ĉevalojn kaj ĉarojn kaj pli multe da homoj
ol ĉe vi, ne timu ilin; ĉar kun vi estas la Eternulo, via
Dio, kiu elkondukis vin el la lando Egipta. 2 Kaj kiam
vi alproksimiĝos al la batalo, tiam elpaŝu la pastro kaj
parolu al la popolo; 3 kaj li diru al ili: Aŭdu, ho Izrael!
vi iras nun en batalon kontraŭ viajn malamikojn; ne
malfortiĝu via koro, ne timu, ne konfuziĝu, kaj ne
tremu antaŭ ili; 4 ĉar la Eternulo, via Dio, iras kun vi,
por batali pro vi kontraŭ viaj malamikoj kaj por helpi
vin. 5 Kaj la kontrolistoj parolu al la popolo, dirante:
Kiu konstruis novan domon kaj ne inaŭguris ĝin, tiu
iru kaj revenu al sia domo, ĉar eble li mortos en la
batalo kaj alia homo ĝin inaŭguros; 6 kaj kiu plantis
vinberĝardenon kaj ne ĝuis ĝiajn fruktojn, tiu iru kaj
revenu al sia domo, ĉar eble li mortos en la batalo kaj
alia homo ĝuos ĝiajn fruktojn; 7 kaj kiu fianĉiĝis kun
virino kaj ne prenis ŝin, tiu iru kaj revenu al sia domo,
ĉar eble li mortos en la batalo kaj alia viro ŝin prenos.
8 Kaj plue la kontrolistoj parolu al la popolo, kaj diru:
Kiu estas timema kaj senkuraĝa, tiu iru kaj revenu al
sia domo, por ke li ne senkuraĝigu la koron de siaj
fratoj, kiel lia koro estas. 9 Kaj kiam la kontrolistoj
finos paroli al la popolo, tiam oni starigu militestrojn
super la popolo. 10 Kiam vi aliros al urbo, por batali
kontraŭ ĝi, tiam proponu al ĝi pacon. 11 Kaj se ĝi
respondos al vi per paco kaj malfermos sin antaŭ
vi, tiam la tuta popolo, kiu troviĝos en ĝi, pagu al vi
tributon kaj servu vin. 12 Sed se ĝi ne faros pacon kun
vi, sed militos kontraŭ vi, tiam sieĝu ĝin; 13 kaj kiam
la Eternulo, via Dio, transdonos ĝin en vian manon,
tiam mortigu ĉiujn ĝiajn virseksulojn per glavo; 14
nur la virinojn kaj la infanojn kaj la brutojn, kaj ĉion,
kio estos en la urbo, la tutan militakiraĵon prenu al vi,
kaj konsumu la militakiraĵon de viaj malamikoj, kiujn
la Eternulo, via Dio, transdonis al vi. 15 Tiel agu kun
ĉiuj urboj, kiuj estas tre malproksime de vi kaj kiuj ne
apartenas al la urboj de tiuj popoloj. 16 Sed al tiuj
urboj de tiuj popoloj, kiujn la Eternulo, via Dio, donas
al vi kiel posedaĵon, lasu la vivon al neniu animo;
17 sed ekstermu ilin: la Ĥetidojn kaj la Amoridojn,
la Kanaanidojn kaj la Perizidojn, la Ĥividojn kaj la
Jebusidojn, kiel ordonis al vi la Eternulo, via Dio;
18 por ke ili ne instruu al vi fari simile al ĉiuj iliaj
abomenaĵoj, kiujn ili faris por siaj dioj, kaj por ke vi
ne peku antaŭ la Eternulo, via Dio. 19 Se vi dum longa
tempo sieĝos urbon, por militakiri ĝin kaj preni ĝin,
ne ruinigu ĝiajn arbojn, levante kontraŭ ilin hakilon;
ĉar vi povas manĝi fruktojn de ili, tial ne forhaku ilin;
ĉar ĉu arbo de kampo estas homo, ke ĝi povus foriri
de vi en la fortikaĵon? 20 Nur tian arbon, pri kiu vi
scios, ke ĝi ne estas arbo fruktodona, vi povas ruinigi
kaj forhaki, por konstrui bastionojn kontraŭ la urbo,
kiu militas kontraŭ vi, ĝis vi ĝin venkos.

21 Se estos trovita mortigito sur la tero, kiun la
Eternulo, via Dio, donas al vi kiel posedaĵon,
kuŝanta sur la kampo, kaj oni ne scios, kiu lin mortigis:
2 tiam eliru viaj plejaĝuloj kaj viaj juĝistoj, kaj ili
mezuru ĝis la urboj, kiuj troviĝas ĉirkaŭe de la
mortigito. 3 Kaj kiu urbo estos plej proksime de la
mortigito, ties plejaĝuloj prenu bovidinon, per kiu oni
ne laboris kaj kiu ne portis jugon; 4 kaj la plejaĝuloj de
tiu urbo forkonduku la bovidinon al valo kun fluanta
akvo, valo, kiu ne estas plugita nek prisemita, kaj ili
rompu tie la kolon de la bovidino en la valo; 5 kaj aliru
la pastroj, idoj de Levi (ĉar ilin elektis la Eternulo,
via Dio, por servi al Li kaj por beni en la nomo de
la Eternulo, kaj laŭ ilia diro devas esti decidata ĉiu
disputo kaj ĉiu difekto); 6 kaj ĉiuj plejaĝuloj de tiu
urbo, kiuj estos la plej proksimaj de la mortigito, lavu
siajn manojn super la bovidino, al kiu oni rompis la
kolon en la valo, 7 kaj ili sciigu kaj diru: Niaj manoj
ne verŝis ĉi tiun sangon, kaj niaj okuloj ne vidis; 8
pekliberigu Vian popolon Izrael, kiun Vi liberigis, ho
Eternulo, kaj ne kalkulu sangon senkulpan inter Via
popolo Izrael. Kaj estos pardonita al ili la sango. 9 Kaj
vi elviŝu el inter vi la sangon de senkulpulo, por ke vi
faru plaĉantaĵon antaŭ la Eternulo. 10 Kiam vi eliros
en militon kontraŭ viajn malamikojn, kaj la Eternulo,
via Dio, transdonos ilin en viajn manojn, kaj vi prenos
de ili kaptitojn, 11 kaj vi vidos inter la kaptitoj virinon
belaspektan kaj ekamos ŝin kaj prenos ŝin al vi kiel
edzinon: 12 tiam venigu ŝin internen de via domo, kaj
ŝi pritondu sian kapon kaj pritranĉu siajn ungojn, 13

kaj ŝi deprenu de si siajn vestojn de kaptiteco, kaj ŝi
loĝu en via domo, kaj ŝi pripploru sian patron kaj sian
patrinon en la daŭro de unu monato; kaj post tio vi
povas eniri al ŝi kaj fariĝi ŝia edzo, kaj ŝi estos por vi
edzino. 14 Kaj se ŝi ne plaĉos al vi, tiam forliberigu
ŝin, kien ŝi volas; sed ne vendu ŝin pro mono, ne
premu ŝin per via forto, pro tio, ke vi humiligis ŝin. 15
Se viro havos du edzinojn, unu amatan kaj duan ne
amatan, kaj ili naskos al li filojn, la amata kaj la ne
amata, kaj la filo unuenaskita estos de la ne amata: 16
tiam ĉe la disdono de sia havo al la filoj li ne povas
doni unuaecon al la filo de la amata antaŭ la filo de
la ne amata, la unuenaskito; 17 sed la unuenaskiton,
la filon de la ne amata, li devas estkonfesi, por doni
al li duoblan parton el ĉio, kio troviĝas ĉe li; ĉar li
estas la unua frukto de lia forto, li havas la rajton
de unuenaskiteco. 18 Se iu havos filon obstinan kaj
malobean, kiu ne aŭskultas la voĉon de sia patro nek
la voĉon de sia patrino, kaj ili punadis lin, sed li ne
aŭskultas ilin: 19 tiam lia patro kaj lia patrino prenu
lin kaj alkonduku lin al la plejaĝuloj de lia urbo kaj al
la pordego de lia loĝoloko; 20 kaj ili diru al la plejaĝuloj
de lia urbo: Ĉi tiu nia filo estas obstina kaj malobea, li
ne aŭskultas nian voĉon, li estas manĝegemulo kaj
drinkemulo. 21 Tiam ĉiuj homoj de lia urbo priĵetu lin
per ŝtonoj, ke li mortu; tiel ekstermu la malbonon el
inter vi, kaj ĉiuj Izraelidoj aŭdos kaj ektimos. 22 Se
iu fariĝos kulpa pri peko, kiu meritas morton, kaj li
estos mortigita kaj vi pendigos lin sur arbo: 23 tiam lia
kadavro ne devas resti dum la nokto sur la arbo, sed
vi devas lin enterigi en la sama tago; ĉar pendigito
estas malbenita antaŭ Dio; kaj ne makulu vian teron,
kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi kiel posedaĵon.

**22** Kiam vi vidos, ke bovo de via frato aŭ lia ŝafo
erarvagas, ne forturnu vin de ili, sed rekonduku
ilin al via frato. 2 Se via frato ne estas proksime de vi
aŭ se vi lin ne konas, tiam enpelu ilin en vian domon,
kaj ili estu ĉe vi, ĝis via frato ilin serĉos, kaj tiam
redonu ilin al li. 3 Tiel same agu kun lia azeno, tiel
same agu kun lia vesto, kaj tiel same agu kun ĉia
perditaĵo de via frato, kun ĉio, kio estos perdita de li
kaj kion vi trovos: vi ne devas forturni vin. 4 Kiam vi
vidos, ke azeno de via frato aŭ lia bovo falis sur la
vojo, ne forturnu vin de ili; levu ilin kune kun li. 5
Ne devas esti apartenaĵo de viro sur virino, kaj viro
ne surmetu sur sin veston de virino; ĉar abomenaĵo
por la Eternulo, via Dio, estas ĉiu, kiu faras tion. 6 Se
vi trovos neston de birdo antaŭ vi sur la vojo, sur iu
arbo aŭ sur la tero, kun birdidoj aŭ kun ovoj, kaj la
patrino sidas sur la birdidoj aŭ sur la ovoj, ne prenu
la patrinon kune kun la idoj; 7 la patrinon forliberigu,
kaj la idojn vi povas preni al vi; por ke estu al vi
bone kaj por ke vi longe vivu. 8 Kiam vi konstruos
novan domon, faru balustradon ĉirkaŭ via tegmento,
por ke vi ne venigu sangon sur vian domon, se iu
defalos de ĝi. 9 Ne prisemu vian vinberĝardenon
per miksospecaj semoj, por ke ne malbeniĝu la tuta
rikolto, la semo, kiun vi semis, kaj la fruktoj de la
vinberĝardeno. 10 Ne plugu per bovo kaj azeno kune.
11 Ne surmetu sur vin miksospecan veston el lano kaj
lino kune. 12 Kvastojn faru al vi sur la kvar anguloj
de via kovrilo, per kiu vi vin kovras. 13 Se iu prenos
edzinon kaj envenos al ŝi kaj ekmalamos ŝin, 14 kaj
li akuzos ŝin kalumnie kaj kurigos pri ŝi malbonon
famon, kaj diros: Ĉi tiun virinon mi prenis, kaj mi
alproksimiĝis al ŝi kaj ne trovis ĉe ŝi virgecon: 15
tiam la patro de la junulino kaj ŝia patrino prenu
kaj elportu la signojn de virgeco de la junulino al la
plejaĝuloj de la urbo al la pordego; 16 kaj la patro
de la junulino diru al la plejaĝuloj: Mian filinon mi
donis al ĉi tiu viro kiel edzinon, kaj li ekmalamis
ŝin; 17 kaj jen li akuzis ŝin kalumnie, dirante: Mi ne
trovis ĉe via filino virgecon; sed jen estas la signoj de
virgeco de mia filino. Kaj ili etendos la veston antaŭ
la plejaĝuloj de la urbo. 18 Tiam la plejaĝuloj de tiu
urbo prenu la edzon kaj punu lin; 19 kaj ili kondamnu
lin al punpago de cent arĝentaj moneroj, kaj ili donu
tion al la patro de la junulino pro tio, ke tiu kurigis
malbonan famon pri junulino Izraelida; kaj ŝi restu lia
edzino, li ne povas forigi ŝin de si dum sia tuta vivo.
20 Sed se tiu afero estos vera kaj ne troviĝos signoj
de virgeco ĉe la junulino: 21 tiam oni alkonduku la
junulinon al la pordo de ŝia patro, kaj la loĝantoj de
ŝia urbo priĵetu ŝin per ŝtonoj, ke ŝi mortu; ĉar ŝi faris
malhonoraĵon en Izrael, malĉastante en la domo de
sia patro. Tiel ekstermu la malbonon el inter vi. 22
Se estos trovita viro, kuŝanta kun virino edzinigita,
tiam oni mortigu ambaŭ, la viron, kiu kuŝis kun la
virino, kaj la virinon. Tiel ekstermu la malbonon el
Izrael. 23 Se juna virgulino estos fianĉigita kun viro,
kaj iu renkontos ŝin en la urbo kaj kuŝos kun ŝi: 24
tiam konduku ilin ambaŭ al la pordego de tiu urbo,
kaj priĵetu ilin per ŝtonoj, ke ili mortu; la junulinon

pro tio, ke ŝi ne kriis en la urbo, kaj la viron pro tio,
ke li senhonorigis la edzinon de sia proksimulo. Tiel
ekstermu la malbonon el inter vi. 25 Sed se sur kampo
renkontos la viro la fianĉigitan junulinon, kaj la viro
ŝin kaptos kaj kuŝos kun ŝi: tiam oni mortigu sole
la viron, kiu kuŝis kun ŝi; 26 sed al la junulino faru
nenion; la junulino ne havas mortomeritan pekon,
ĉar tiu afero estas tia, kiel se iu leviĝas kontraŭ sian
proksimulon kaj mortigas lin; 27 li renkontis ja ŝin
sur kampo, la fianĉigita junulino eble kriis, sed neniu
ŝin savis. 28 Se iu renkontos junulinon virgulinon ne
fianĉigitan kaj kaptos ŝin kaj kuŝos kun ŝi, kaj oni ilin
trovos: 29 tiam la viro, kiu kuŝis kun ŝi, donu al la
patro de la junulino kvindek arĝentajn monerojn, kaj
ŝi fariĝu lia edzino, pro tio, ke li senhonorigis ŝin; li
ne povas forigi ŝin de si dum sia tuta vivo. 30 Neniu
prenu la edzinon de sia patro, nek malkovru la baskon
de sia patro.

**23** Kiu havas dispremitajn testikojn aŭ detranĉitan
seksan membron, tiu ne povas eniri en la
komunumon de la Eternulo. 2 Peknaskito ne povas
eniri en la komunumon de la Eternulo; eĉ lia deka
generacio ne povas eniri en la komunumon de la
Eternulo. 3 Amonido kaj Moabido ne povas eniri en la
komunumon de la Eternulo; eĉ ilia deka generacio ne
povas eniri en la komunumon de la Eternulo eterne; 4
pro tio, ke ili ne renkontis vin kun pano kaj akvo sur la
vojo, kiam vi iris el Egiptujo, kaj ke ili dungis kontraŭ
vi Bileamon, filon de Beor, el Petor en Mezopotamio,
por malbeni vin. 5 Sed la Eternulo, via Dio, ne volis
aŭskulti Bileamon; kaj la Eternulo, via Dio, turnis por
vi la malbenon en benon, ĉar la Eternulo, via Dio,
amas vin. 6 Ne faru al ili pacon nek bonon dum via
tuta ekzistado eterne. 7 Ne abomenu Edomidon, ĉar
li estas via frato; ne abomenu Egipton, ĉar vi estis
fremdulo en lia lando. 8 La infanoj, kiuj naskiĝos de
ili, en la tria generacio povas eniri en la komunumon
de la Eternulo. 9 Kiam vi eliros tendare kontraŭ viajn
malamikojn, tiam gardu vin kontraŭ ĉio malbona. 10
Se estos inter vi iu, kiu ne estos pura pro okazintaĵo
nokta, li eliru ekster la tendaron, li ne venu internen
de la tendaro; 11 kiam fariĝos vespero, li lavu sin per
akvo, kaj post la subiro de la suno li povas veni en la
tendaron. 12 Lokon vi devas havi ekster la tendaro,
kien vi eliradus por necesaĵoj. 13 Fosileton vi devas
havi ĉe vi sur rimeno; kaj kiam vi sidos ekstere,
fosu per ĝi kaj reen kovru vian elirintaĵon; 14 ĉar
la Eternulo, via Dio, iras meze de via tendaro, por
savi vin kaj por transdoni al vi viajn malamikojn;
tial via tendaro devas esti sankta, por ke Li ne vidu
inter vi ion hontindan kaj ne deturniĝu de vi. 15 Ne
transdonu sklavon al lia sinjoro, se li serĉos rifuĝon ĉe
vi kontraŭ sia sinjoro; 16 kun vi li loĝu, inter vi, sur la
loko, kiun li elektos en unu el viaj urboj, kie plaĉos al
li; ne premu lin. 17 Ne devas esti malĉastistino inter la
filinoj de Izrael, kaj ne devas esti malĉastisto inter la
filoj de Izrael. 18 Ne enportu pagon de malĉastistino
nek de malĉastisto en la domon de la Eternulo, via
Dio, pro ia promeso; ĉar ambaŭ estas abomenaĵo
antaŭ la Eternulo, via Dio. 19 Ne donu kreskige al via
frato monon, nek manĝaĵon, nek ion alian, kion oni
povas doni kreskige. 20 Al alilandulo vi povas doni
kreskige, sed al via frato ne donu kreskige; por ke
la Eternulo, via Dio, benu vin en ĉiu entrepreno de
viaj manoj sur la tero, sur kiun vi venas, por ekposedi
ĝin. 21 Se vi faros promeson al la Eternulo, via Dio,
ne prokrastu plenumi ĝin; ĉar la Eternulo, via Dio,
postulos ĝin de vi, kaj estos sur vi peko. 22 Sed se vi ne
faros promeson, ne estos sur vi peko. 23 Kio eliris el
via buŝo, tion observu kaj plenumu, kiel vi promesis
al la Eternulo, via Dio, propravole, kion vi diris per
via buŝo. 24 Kiam vi eniros en vinberĝardenon de via
proksimulo, vi povas manĝi vinberojn kiom vi volos,
ĝissate; sed en vian vazon ne metu. 25 Kiam vi venos
sur la grenkampon de via proksimulo, vi povas deŝiri
spikojn per viaj manoj; sed rikoltilon ne levu kontraŭ
la grenkampon de via proksimulo.

**24** Se iu prenos virinon kaj fariĝos ŝia edzo, kaj
okazos, ke ŝi ne plaĉas al li, ĉar li trovis ĉe ŝi ion
hontindan: tiam li skribu al ŝi eksedzigan leteron kaj
donu ĝin en ŝian manon kaj forsendu ŝin el sia domo.
2 Kaj se ŝi eliros el lia domo kaj iros kaj edziniĝos
kun alia viro; 3 kaj tiu lasta edzo ŝin ekmalamos kaj
skribos al ŝi eksedzigan leteron kaj donos en ŝian
manon kaj forsendos ŝin el sia domo; aŭ mortos tiu
lasta viro, kiu prenis ŝin kiel edzinon: 4 tiam ŝia unua
edzo, kiu forsendis ŝin, ne povas preni ŝin denove kiel
edzinon, post kiam ŝi estas malpurigita; ĉar tio estas
abomenaĵo antaŭ la Eternulo; kaj vi ne pekmakulu
la teron, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi kiel
heredaĵon. 5 Se iu antaŭ nelonge edziĝis, li ne iru en
militon, kaj oni nenion metu sur lin; li restu libera en

sia domo dum unu jaro, kaj li gajigu sian edzinon, kiun
li prenis. 6 Neniu prenu kiel garantiaĵon muelilon
aŭ supran muelŝtonon, ĉar tiam li prenus garantiaĵe
animon. 7 Se oni trovos iun, kiu ŝtelis iun el siaj fratoj,
el la Izraelidoj, kaj sklavigis lin kaj vendis lin, tiu
ŝtelinto devas morti; kaj tiel ekstermu la malbonon el
inter vi. 8 Atentu pri la infekto de lepro, ke vi observu
precize kaj plenumu ĉion, kion instruos al vi la pastroj
Levidoj; kiel mi ordonis al ili, tiel penu agi. 9 Memoru,
kion la Eternulo, via Dio, faris al Mirjam sur la vojo,
kiam vi iris el Egiptujo. 10 Se vi ion pruntedonos al
via proksimulo, ne iru en lian domon, por preni de
li garantiaĵon; 11 staru sur la strato; kaj la homo,
al kiu vi pruntedonis, elportos al vi la garantiaĵon
eksteren. 12 Kaj se li estas malriĉulo, tiam ne dormu
kun lia garantiaĵo; 13 redonu al li la garantiaĵon ĉe la
subiro de la suno, por ke li kuŝu en sia vesto kaj benu
vin; kaj vi havos meriton antaŭ la Eternulo, via Dio.
14 Ne faru maljustaĵon al dungito, al malriĉulo kaj
senhavulo el viaj fratoj aŭ el viaj fremduloj, kiuj loĝas
en via lando, en viaj urboj: 15 en la sama tago donu
al li lian pagon, ke la suno ne subiru super ĝi, ĉar li
estas malriĉa kaj per tio li subtenas sian vivon; ke li
ne plendu kontraŭ vi al la Eternulo kaj vi ne havu
sur vi pekon. 16 Patrojn oni ne mortigu pro la gefiloj,
kaj gefilojn oni ne mortigu pro la patroj: ĉiu devas
ricevi morton pro sia krimo. 17 Ne juĝu malĝuste
fremdulon, orfon, kaj ne prenu garantiaĵe veston de
vidvino. 18 Kaj memoru, ke vi estis sklavo en Egiptujo,
kaj la Eternulo, via Dio, liberigis vin el tie; tial mi
ordonas al vi, ke vi agu tiel. 19 Kiam vi rikoltos vian
rikolton sur via kampo kaj vi forgesos garbon sur
la kampo, ne iru returne por preni ĝin: ĝi restu por
la fremdulo, por la orfo, kaj por la vidvino; por ke
la Eternulo, via Dio, benu vin en ĉiuj faroj de viaj
manoj. 20 Kiam vi debatos la fruktojn de via olivarbo,
ne debatu ĝis fino: io restu por la fremdulo, por la
orfo, kaj por la vidvino. 21 Kiam vi rikoltos en via
vinberejo, ne forkolektu la restaĵon post vi: io restu
por la fremdulo, por la orfo, kaj por la vidvino. 22 Kaj
memoru, ke vi estis sklavo en la lando Egipta; pro tio
mi ordonas al vi agi tiel.

**25** Se estos disputo inter homoj, ili venu al la
juĝo, kaj oni juĝu ilin, kaj oni deklaru prava la
pravulon, kaj la malpravulon oni kondamnu. 2 Kaj
se la kulpulo meritas batojn, tiam la juĝisto ordonu
kuŝigi lin kaj bati lin antaŭ li laŭ la grado de lia
kulpeco, laŭ kalkulo. 3 Kvardek batojn oni povas doni
al li, sed ne pli; oni ne batu lin tro multe, por ke via
frato ne estu humiligita antaŭ viaj okuloj. 4 Ne fermu
la buŝon al bovo draŝanta. 5 Se fratoj loĝas kune, kaj
unu el ili mortas, ne havante filon, tiam la edzino
de la mortinto ne devas edziniĝi ekstere kun viro
fremda; sed ŝia bofrato venu al ŝi kaj prenu ŝin al si
kiel edzinon kaj vivu kun ŝi. 6 Kaj la unuenaskito, kiun
ŝi naskos, ricevos la nomon de lia mortinta frato, por
ke ne malaperu lia nomo en Izrael. 7 Sed se tiu viro ne
deziros preni sian bofratinon, tiam lia bofratino devas
iri al la pordego, al la plejaĝuloj, kaj diri: Mia bofrato
rifuzas restarigi al sia frato nomon en Izrael, li ne
volas edziĝi kun mi. 8 Tiam la plejaĝuloj de lia urbo
devas voki lin kaj admoni lin. Kaj se li stariĝos, kaj
diros: Mi ne volas preni ŝin: 9 tiam lia bofratino devas
aliri al li antaŭ la okuloj de la plejaĝuloj, kaj depreni
lian ŝuon de lia piedo kaj kraĉi sur lian vizaĝon, kaj
respondi kaj diri: Tiel oni agas kun homo, kiu ne
konstruas domon al sia frato. 10 Kaj oni donu al li
nomon en Izrael: Domo de senŝuigito. 11 Se du viroj
kverelas inter si, kaj aliros la edzino de unu, por savi
sian edzon el la mano de lia batanto, kaj ŝi etendos
sian manon kaj kaptos lian hontan parton: 12 tiam
dehaku ŝian manon, via okulo ne indulgu ŝin. 13
Ne havu en via sako duspecajn pezilojn, grandajn
kaj malgrandajn. 14 Ne havu en via domo duspecajn
efojn, grandan kaj malgrandan. 15 Pezilon plenan
kaj ĝustan vi devas havi, efon plenan kaj ĝustan vi
devas havi; por ke vi longe vivu sur la tero, kiun
la Eternulo, via Dio, donas al vi. 16 Ĉar abomenaĵo
por la Eternulo, via Dio, estas ĉiu, kiu faras tion, ĉiu,
kiu faras maljustaĵon. 17 Memoru, kion faris al vi
Amalek sur la vojo, kiam vi iris el Egiptujo; 18 kiel li
renkontis vin sur la vojo, kaj mortigis ĉe vi ĉiujn, kiuj,
malfortiĝinte, restis malantaŭe, kiam vi estis laca kaj
multelaborinta; kaj li ne timis Dion. 19 Tial, kiam la
Eternulo, via Dio, ripozigos vin de ĉiuj viaj malamikoj
ĉirkaŭe en la lando, kiun la Eternulo, via Dio, donas
al vi kiel heredan posedaĵon, elviŝu la memoron pri
Amalek el sub la ĉielo; ne forgesu.

**26** Kaj kiam vi venos en la landon, kiun la Eternulo,
via Dio, donas al vi kiel posedaĵon, kaj vi
ekposedos ĝin kaj enloĝiĝos en ĝi: 2 tiam prenu el la
unuaj el ĉiuj fruktoj de la tero, kiujn vi ricevos de via

tero, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi, kaj metu
en korbon, kaj iru al la loko, kiun la Eternulo, via Dio,
elektos, por loĝigi tie Sian nomon; 3 kaj venu al la
pastro, kiu estos en tiu tempo, kaj diru al li: Mi sciigas
hodiaŭ antaŭ la Eternulo, via Dio, ke mi eniris en la
landon, pri kiu la Eternulo ĵuris al niaj patroj, ke Li
donos ĝin al ni. 4 Kaj la pastro prenos la korbon el via
mano, kaj metos ĝin antaŭ la altaron de la Eternulo,
via Dio. 5 Kaj vi ekparolos, kaj diros antaŭ la Eternulo,
via Dio: Vaganta Siriano estis mia patro, kaj li foriris
en Egiptujon kaj enloĝiĝis tie fremdule kun malmulte
da homoj, kaj fariĝis tie popolo granda, forta, kaj
multenombra; 6 kaj la Egiptoj agis malbone kontraŭ
ni kaj premis nin kaj metis sur nin malfacilan laboron;
7 kaj ni ekkriis al la Eternulo, la Dio de niaj patroj,
kaj la Eternulo aŭskultis nian voĉon kaj vidis nian
mizeron kaj nian laboradon kaj nian prematecon; 8
kaj la Eternulo elkondukis nin el Egiptujo per mano
forta kaj per brako etendita kaj per granda teruro kaj
per signoj kaj mirakloj; 9 kaj Li venigis nin al ĉi tiu
loko kaj donis al ni ĉi tiun landon, landon, en kiu fluas
lakto kaj mielo; 10 kaj nun jen mi alportis la unuajn
fruktojn de la tero, kiun Vi donis al mi, ho Eternulo.
Kaj vi metos tion antaŭ la Eternulon, vian Dion, kaj
vi adorkliniĝos antaŭ la Eternulo, via Dio. 11 Kaj vi
estos gaja pro la tuta bono, kiun donis la Eternulo,
via Dio, al vi kaj al via domo, vi, kaj la Levido, kaj
la fremdulo, kiu loĝas inter vi. 12 Kiam vi finos la
apartigadon de ĉiuj dekonaĵoj el viaj produktaĵoj en la
tria jaro, la jaro de la dekonaĵoj, kaj vi fordonos al la
Levido kaj al la fremdulo, al la orfo kaj al la vidvino,
por ke ili manĝu inter viaj pordegoj kaj satiĝu: 13
tiam diru antaŭ la Eternulo, via Dio: Mi forigis la
sanktigitaĵon el la domo, kaj mi donis ĝin al la Levido
kaj al la fremdulo, al la orfo kaj al la vidvino, tute
laŭ Via ordono, kiun Vi faris al mi; mi ne transpaŝis
Viajn ordonojn kaj mi ne forgesis; 14 mi ne manĝis el
ĝi en la tagoj de mia malĝojo, kaj mi ne apartigis el
ĝi en stato de malpureco, kaj mi ne donis el ĝi por
mortinto; mi aŭskultis la voĉon de la Eternulo, mia
Dio; mi faris konforme al ĉio, kion Vi ordonis al mi. 15
Ekrigardu el Via sankta loĝejo, el la ĉielo, kaj benu
Vian popolon Izrael, kaj la teron, kiun Vi donis al ni,
kiel Vi ĵuris al niaj patroj, la landon, en kiu fluas lakto
kaj mielo. 16 En la hodiaŭa tago la Eternulo, via Dio,
ordonas al vi plenumi ĉi tiujn leĝojn kaj regulojn; kaj
observu kaj plenumu ilin per via tuta koro kaj per via
tuta animo. 17 Al la Eternulo vi promesis hodiaŭ, ke Li
estos via Dio, kaj ke vi iros laŭ Liaj vojoj kaj observos
Liajn leĝojn kaj Liajn ordonojn kaj Liajn decidojn kaj
aŭskultos Lian voĉon. 18 Kaj la Eternulo promesis al vi
hodiaŭ, ke vi estos al Li popolo propra, kiel Li diris
al vi, se vi observos ĉiujn Liajn ordonojn; 19 kaj ke
Li starigos vin pli alte ol ĉiuj popoloj, kiujn Li kreis,
en honoro, gloro, kaj majesto, kaj ke vi estos popolo
sankta al la Eternulo, via Dio, kiel Li diris.

**27** Kaj Moseo kaj la plejaĝuloj de Izrael ordonis
al la popolo, dirante: Observu ĉiujn ordonojn,
kiujn mi ordonas al vi hodiaŭ. 2 Kaj kiam vi transiros
trans Jordanon en la landon, kiun la Eternulo, via Dio,
donas al vi, tiam starigu al vi grandajn ŝtonojn kaj
ĉirkaŭŝmiru ilin per kalko; 3 kaj skribu sur ili ĉiujn
vortojn de ĉi tiu instruo, kiam vi transiros, por ke vi
venu en la landon, kiun la Eternulo, via Dio, donis al
vi, la landon, en kiu fluas lakto kaj mielo, kiel parolis
al vi la Eternulo, la Dio de viaj patroj. 4 Kaj kiam vi
transiros Jordanon, tiam starigu ĉi tiujn ŝtonojn, pri
kiuj mi ordonas al vi hodiaŭ, sur la monto Ebal, kaj
ĉirkaŭŝmiru ilin per kalko. 5 Kaj konstruu tie altaron
al la Eternulo, via Dio, altaron el ŝtonoj; ne levu sur
ilin feron. 6 El ŝtonoj tutaj konstruu la altaron de la
Eternulo, via Dio, kaj alportu sur ĝi bruloferojn al la
Eternulo, via Dio; 7 kaj buĉu pacoferojn, kaj manĝu
tie, kaj estu gaja antaŭ la Eternulo, via Dio. 8 Kaj
skribu tre klare sur la ŝtonoj ĉiujn vortojn de ĉi tiu
instruo. 9 Kaj Moseo kaj la pastroj Levidoj ekparolis al
la tuta Izrael, dirante: Silentu kaj aŭskultu, ho Izrael;
en la hodiaŭa tago vi fariĝis popolo al la Eternulo,
via Dio. 10 Aŭskultu do la voĉon de la Eternulo, via
Dio, kaj plenumu Liajn ordonojn kaj Liajn leĝojn,
kiujn mi donas al vi hodiaŭ. 11 Kaj Moseo ordonis
al la popolo en tiu tago, dirante: 12 Ĉi tiuj stariĝu,
por beni la popolon, sur la monto Gerizim, kiam vi
transiros Jordanon: Simeon kaj Levi kaj Jehuda kaj
Isaĥar kaj Jozef kaj Benjamen. 13 Kaj ĉi tiuj stariĝu
por malbenado sur la monto Ebal: Ruben, Gad kaj
Aŝer kaj Zebulun, Dan kaj Naftali. 14 Kaj la Levidoj
ekparolos, kaj diros al ĉiuj Izraelidoj per laŭta voĉo: 15
Malbenita estu la homo, kiu faros idolon skulptitan aŭ
fanditan, abomenaĵon antaŭ la Eternulo, manfaritaĵon
de artisto, kaj starigos ĝin sekrete. Kaj la tuta popolo
respondos kaj diros: Amen. 16 Malbenita estu, kiu ne
respektas sian patron kaj sian patrinon. Kaj la tuta
popolo diros: Amen. 17 Malbenita estu, kiu forŝovas

la limon de sia proksimulo. Kaj la tuta popolo diros:
Amen. 18 Malbenita estu, kiu erarigas blindulon pri la
vojo. Kaj la tuta popolo diros: Amen. 19 Malbenita
estu, kiu forklinas la rajton de fremdulo, orfo, kaj
vidvino. Kaj la tuta popolo diros: Amen. 20 Malbenita
estu, kiu kuŝas kun la edzino de sia patro; ĉar li
malkovris la baskon de sia patro. Kaj la tuta popolo
diros: Amen. 21 Malbenita estu, kiu kuŝas kun ia bruto.
Kaj la tuta popolo diros: Amen. 22 Malbenita estu,
kiu kuŝas kun sia fratino, filino de sia patro aŭ filino
de sia patrino. Kaj la tuta popolo diros: Amen. 23
Malbenita estu, kiu kuŝas kun sia bopatrino. Kaj la
tuta popolo diros: Amen. 24 Malbenita estu, kiu kaŝe
mortigas sian proksimulon. Kaj la tuta popolo diros:
Amen. 25 Malbenita estu, kiu prenas subaĉeton, por
mortigi animon, sangon senkulpan. Kaj la tuta popolo
diros: Amen. 26 Malbenita estu, kiu ne persistos en la
vortoj de ĉi tiu instruo, por plenumi ilin. Kaj la tuta
popolo diros: Amen.

**28** Se vi aŭskultos la voĉon de la Eternulo, via Dio,
penante plenumi ĉiujn Liajn ordonojn, kiujn mi
transdonas al vi hodiaŭ, tiam la Eternulo, via Dio,
faros vin pli alta, ol ĉiuj popoloj de la tero. 2 Kaj
venos sur vin ĉiuj ĉi tiuj benoj kaj atingos vin, se vi
aŭskultos la voĉon de la Eternulo, via Dio. 3 Benita vi
estos en la urbo, kaj benita vi estos sur la kampo. 4
Benita estos la frukto de via ventro kaj la frukto de
via tero kaj la frukto de via bruto, la naskitaĵo de viaj
grandaj brutoj kaj la idaro de viaj malgrandaj brutoj.
5 Benita estos via korbo kaj via pastujo. 6 Benita vi
estos ĉe via venado, kaj benita vi estos ĉe via elirado.
7 La Eternulo, via Dio, faros, ke viaj malamikoj, kiuj
leviĝos kontraŭ vin, estos frapitaj antaŭ vi; per unu
vojo ili eliros kontraŭ vin, kaj per sep vojoj ili forkuros
de antaŭ vi. 8 La Eternulo sendos al vi la benon por
viaj grenejoj kaj por ĉiu entrepreno de viaj manoj,
kaj Li benos vin sur la tero, kiun la Eternulo, via
Dio, donas al vi. 9 La Eternulo starigos vin al Si kiel
popolon sanktan, kiel Li ĵuris al vi, se vi observos
la ordonojn de la Eternulo, via Dio, kaj iros laŭ Liaj
vojoj. 10 Kaj vidos ĉiuj popoloj de la tero, ke la nomo
de la Eternulo estas sur vi, kaj ili timos vin. 11 Kaj la
Eternulo donos al vi abundon da bono en la frukto de
via ventro kaj en la frukto de via bruto kaj en la frukto
de via tero, sur la tero, pri kiu la Eternulo ĵuris al viaj
patroj, ke Li donos ĝin al vi. 12 La Eternulo malfermos
al vi Sian bonan trezorejon, la ĉielon, por doni al via
tero la pluvon en la ĝusta tempo kaj por beni ĉiujn
farojn de viaj manoj; kaj vi pruntedonos al multaj
popoloj, sed vi ne prunteprenos. 13 Kaj la Eternulo
faros vin kapo, ne vosto, kaj vi estos nur supre, kaj
vi ne estos malsupre; se vi obeos la ordonojn de la
Eternulo, via Dio, kiujn mi transdonas al vi hodiaŭ,
por observi kaj plenumi, 14 kaj se vi ne dekliniĝos de
ĉiuj vortoj, kiujn mi ordonas al vi hodiaŭ, dekstren
nek maldekstren, por sekvi aliajn diojn, servante al ili.
15 Sed se vi ne aŭskultos la voĉon de la Eternulo, via
Dio, penante plenumi ĉiujn Liajn ordonojn kaj leĝojn,
kiujn mi transdonas al vi hodiaŭ, tiam venos sur vin
ĉiuj ĉi tiuj malbenoj kaj atingos vin. 16 Malbenita
vi estos en la urbo, kaj malbenita vi estos sur la
kampo. 17 Malbenita estos via korbo kaj via pastujo.
18 Malbenita estos la frukto de via ventro kaj la frukto
de via tero, la naskitaĵo de viaj grandaj brutoj kaj la
idaro de viaj malgrandaj brutoj. 19 Malbenita vi estos
ĉe via venado, kaj malbenita vi estos ĉe via elirado.
20 La Eternulo sendos sur vin malbenon, konfuzon,
kaj malsukceson en ĉiuj entreprenoj de via mano,
kion ajn vi faros, ĝis vi estos ekstermita kaj ĝis vi
baldaŭ pereos, pro viaj malbonaj agoj, pro tio, ke vi
Min forlasis. 21 La Eternulo alkroĉos al vi la peston,
ĝis Li ekstermos vin de sur la tero, al kiu vi iras, por
ekposedi ĝin. 22 La Eternulo frapos vin per ftizo kaj
per febro kaj per malsaneca varmego kaj per brulumo
kaj per sekeco kaj per bruliga aero kaj per flaviĝo de
la kreskaĵoj; kaj ili persekutos vin, ĝis vi pereos. 23
Kaj via ĉielo, kiu estas super via kapo, fariĝos kupro;
kaj la tero, kiu estas sub vi, fariĝos fero. 24 Anstataŭ
pluvo la Eternulo donos al via tero polvon kaj cindron;
el la ĉielo ĝi falados sur vin, ĝis vi ekstermiĝos. 25
Frapos vin la Eternulo antaŭ viaj malamikoj; per unu
vojo vi eliros al ili, kaj per sep vojoj vi forkuros de
antaŭ ili; kaj vi estos terurilo por ĉiuj regnoj de la
tero. 26 Kaj via kadavro estos manĝaĵo por ĉiuj birdoj
de la ĉielo kaj por la bestoj de la tero, kaj neniu ilin
forpelos. 27 La Eternulo frapos vin per abscesoj de
Egiptujo kaj per sangaj ulceroj kaj per favo kaj per
skabio, de kiuj vi ne povos resaniĝi. 28 La Eternulo
frapos vin per frenezeco kaj per blindeco kaj per
senkapableco. 29 Kaj vi palpados en tagmezo, kiel
palpas blindulo en mallumo, kaj vi ne sukcesos sur
viaj vojoj; kaj vi estos premata kaj prirabata ĉiutage,
kaj neniu vin helpos. 30 Kun virino vi fianĉiĝos, sed

alia viro kuŝos kun ŝi; domon vi konstruos, sed vi ne
loĝos en ĝi; vinberĝardenon vi plantos, sed vi ne ĝuos
ĝiajn fruktojn. 31 Via bovo estos buĉita antaŭ viaj
okuloj, sed vi ne manĝos de ĝi; via azeno estos rabita
for de vi kaj ne revenos al vi; viaj ŝafoj estos fordonitaj
al viaj malamikoj, kaj neniu vin helpos. 32 Viaj filoj
kaj viaj filinoj estos fordonitaj al alia popolo, kaj viaj
okuloj rigardos kaj sopiros pri ili la tutan tagon; sed
ne estos forto en viaj manoj. 33 La fruktojn de via
tero kaj vian tutan laboron manĝos popolo, kiun vi ne
konis; kaj vi estos nur premata kaj turmentata en ĉiu
tempo. 34 Kaj vi freneziĝos de la vidaĵo antaŭ viaj
okuloj, kiun vi vidos. 35 La Eternulo frapos vin per
malbonaj ulceroj sur la genuoj kaj sur la tibikarnoj,
ulceroj, de kiuj vi ne povos resaniĝi, de la plando de
via piedo ĝis via verto. 36 La Eternulo foririgos vin,
kaj la reĝon, kiun vi starigos super vi, al popolo, kiun
ne konis vi nek viaj patroj; kaj vi servos tie al fremdaj
dioj el ligno kaj el ŝtono. 37 Kaj vi estos terurilo,
instrua ekzemplo, kaj mokataĵo ĉe ĉiuj popoloj, al
kiuj la Eternulo vin foririgos. 38 Multe da semoj vi
elportos sur la kampon, sed malmulte vi enkolektos;
ĉar formanĝos tion la akridoj. 39 Vinberĝardenojn vi
plantos kaj prilaboros, sed vinon vi ne trinkos, nek
enkolektos berojn; ĉar formanĝos ilin la vermoj. 40
Olivarbojn vi havos en ĉiuj viaj limoj, sed per oleo
vi vin ne ŝmiros; ĉar senfruktiĝos viaj olivarboj. 41
Filojn kaj filinojn vi naskigos, sed ili ne estos ĉe vi;
ĉar ili iros en malliberecon. 42 Ĉiujn viajn arbojn kaj
la fruktojn de via tero ekposedos la insektoj. 43 La
fremdulo, kiu estos inter vi, leviĝos super vi ĉiam pli
kaj pli alte, kaj vi malleviĝos ĉiam pli kaj pli malalte.
44 Li pruntedonos al vi, sed vi ne pruntedonos al li; li
estos kapo, kaj vi estos vosto. 45 Kaj venos sur vin ĉiuj
ĉi tiuj malbenoj kaj persekutos vin kaj atingos vin,
ĝis vi estos ekstermita; ĉar vi ne aŭskultis la voĉon
de la Eternulo, via Dio, por observi Liajn ordonojn
kaj Liajn leĝojn, kiujn Li donis al vi. 46 Kaj ili estos
kiel signoj kaj avertoj sur vi kaj sur via idaro eterne;
47 pro tio, ke vi ne servis al la Eternulo, via Dio, en
gajeco kaj kun ĝoja koro, kiam vi ĉion havis abunde.
48 Kaj vian malamikon, kiun la Eternulo sendos sur
vin, vi servos en malsato kaj soifo kaj nudeco kaj
manko de ĉio; kaj li metos feran jugon sur vian kolon,
ĝis li ekstermos vin. 49 La Eternulo venigos sur vin
popolon de malproksime, de la fino de la tero; ĝi
venos, kiel flugas aglo; tio estos popolo, kies lingvon
vi ne komprenos, 50 popolo aroganta, kiu ne respektos
maljunulon kaj ne kompatos junulon. 51 Kaj ĝi manĝos
la fruktojn de viaj brutoj kaj la fruktojn de via tero,
ĝis ĝi ruinigos vin tiel, ke ĝi ne lasos al vi grenon, nek
moston, nek oleon, nek naskitaĵojn de viaj grandaj
brutoj, nek idaron de viaj malgrandaj brutoj, ĝis ĝi
pereigos vin. 52 Kaj ĝi premos vin en ĉiuj viaj pordegoj,
ĝis falos viaj altaj kaj fortikaj muroj, kiujn vi fidis, en
via tuta lando; kaj ĝi premos vin en ĉiuj viaj pordegoj,
en via tuta lando, kiun la Eternulo, via Dio, donis al vi.
53 Kaj vi manĝos la frukton de via ventro, la karnon de
viaj filoj kaj viaj filinoj, kiujn donis al vi la Eternulo,
via Dio, en la sieĝado kaj premado, per kiu premos
vin via malamiko. 54 Viro delikata inter vi kaj tre
alkutimiĝinta al lukso, malamike rigardos sian fraton,
sian amatan edzinon, siajn restintajn infanojn, 55
donante al neniu el ili iom de la karno de siaj infanoj,
kiun li manĝos; ĉar restis al li nenio en la sieĝado kaj
premado, per kiu premos vin via malamiko en ĉiuj viaj
pordegoj. 56 Virino delikata inter vi kaj dorlotita, kiu
neniam starigis sian piedon sur la tero pro dorlotiteco
kaj delikateco, malamike rigardos sian amatan edzon
kaj sian filon kaj sian filinon, 57 ne donante al ili
la placenton, kiu eliras el inter ŝiaj piedoj, nek la
infanojn, kiujn ŝi naskas; ĉar, pro manko de ĉio, ŝi
manĝos ilin sekrete, en la sieĝado kaj premado, per
kiu premos vin via malamiko en viaj pordegoj. 58 Se
vi ne penos plenumi ĉiujn vortojn de ĉi tiu instruo,
skribitajn en ĉi tiu libro, timante ĉi tiun gloran kaj
timindan nomon: LA ETERNULON, VIAN DION: 59
tiam la Eternulo distingos viajn plagojn kaj la plagojn
de via idaro, kiel plagojn grandajn kaj longedaŭrajn
kaj malsanojn malbonajn kaj longedaŭrajn. 60 Kaj Li
turnos sur vin ĉiujn malsanojn de Egiptujo, kiujn vi
timis, kaj ili alkroĉiĝos al vi. 61 Ankaŭ ĉian malsanon
kaj ĉian plagon, kiuj ne estas skribitaj en ĉi tiu libro
de instruo, la Eternulo venigos sur vin, ĝis vi estos
ekstermita. 62 Kaj restos de vi malgranda amaseto,
anstataŭ tio, ke vi estis multaj, kiel la steloj de la ĉielo;
pro tio, ke vi ne aŭskultis la voĉon de la Eternulo, via
Dio. 63 Kaj kiel ĝojis la Eternulo, farante al vi bonon
kaj multigante vin, tiel ĝojos la Eternulo, pereigante
vin kaj ekstermante vin; kaj vi estos elŝirita el la
lando, en kiun vi iras, por ekposedi ĝin. 64 Kaj la
Eternulo disĵetos vin inter ĉiujn popolojn, de unu fino
de la tero ĝis la alia fino de la tero; kaj vi servos tie al
fremdaj dioj el ligno kaj el ŝtono, dioj, kiujn ne konis

vi nek viaj patroj. 65 Sed ankaŭ inter tiuj popoloj vi
ne trankviliĝos, kaj ne estos ripozo por via piedo;
kaj la Eternulo donos al vi tie koron tremantan kaj
senfortiĝon de la okuloj kaj suferadon de la animo. 66
Kaj via vivo estos pendanta antaŭ vi; kaj vi timos tage
kaj nokte, kaj vi ne estos certa pri via vivo. 67 Matene
vi diros: Ho, venu la vespero! kaj vespere vi diros: Ho,
venu la mateno! pro la kortremo, kiu atakos vin, kaj
pro la vidaĵo antaŭ viaj okuloj, kiun vi vidos. 68 Kaj la
Eternulo revenigos vin en Egiptujon per ŝipoj, per
la vojo, pri kiu mi diris al vi, ke vi ne plu vidos ĝin;
kaj vi vende proponos vin tie al viaj malamikoj kiel
sklavojn kaj sklavinojn, sed neniu aĉetos.

**29** Tio estas la vortoj de la interligo, kiun la Eternulo
ordonis al Moseo fari kun la Izraelidoj en la
lando de Moab, krom la interligo, kiun Li faris kun ili
sur Ĥoreb. 2 Kaj Moseo vokis al ĉiuj Izraelidoj, kaj
diris al ili: Vi vidis ĉion, kion faris la Eternulo antaŭ
viaj okuloj en la lando Egipta al Faraono kaj al ĉiuj
liaj servantoj kaj al lia tuta lando, 3 tiujn grandajn
provojn, kiujn vidis viaj okuloj, tiujn grandajn signojn
kaj miraklojn. 4 Sed la Eternulo ne donis al vi koron,
por kompreni, nek okulojn, por vidi, nek orelojn, por
aŭdi, ĝis la nuna tago. 5 Kaj mi kondukis vin dum
kvardek jaroj en la dezerto; ne sentaŭgiĝis viaj vestoj
sur vi, kaj viaj ŝuoj ne sentaŭgiĝis sur via piedo. 6
Panon vi ne manĝis, kaj vinon kaj ebriigaĵojn vi ne
trinkis; por ke vi sciu, ke Mi, la Eternulo, estas via Dio.
7 Kaj vi venis al ĉi tiu loko; kaj eliris Siĥon, reĝo de
Ĥeŝbon, kaj Og, reĝo de Baŝan, kontraŭ nin milite,
kaj ni venkobatis ilin; 8 kaj ni prenis ilian landon,
kaj ni donis ĝin kiel posedaĵon al la Rubenidoj kaj
al la Gadidoj kaj al duono de la tribo de Manase. 9
Observu do la vortojn de ĉi tiu interligo kaj plenumu
ilin, por ke vi sukcesu en ĉio, kion vi faros. 10 Vi
ĉiuj staras hodiaŭ antaŭ la Eternulo, via Dio; viaj
estroj, viaj triboj, viaj plejaĝuloj, kaj viaj oficistoj,
ĉiuj Izraelidoj; 11 viaj infanoj, viaj edzinoj, kaj via
fremdulo, kiu estas en via tendaro, de la hakanto de
via ligno ĝis la ĉerpanto de via akvo; 12 por ke vi
transiru en la interligon de la Eternulo, via Dio, kaj en
Lian ĵuran interkonsenton, kiun la Eternulo, via Dio,
faras kun vi hodiaŭ, 13 por ke Li starigu vin hodiaŭ
kiel Sian popolon, kaj Li estu al vi Dio, kiel Li diris al
vi, kaj kiel Li ĵuris al viaj patroj, al Abraham, al Isaak,
kaj al Jakob. 14 Kaj ne kun vi solaj mi faras ĉi tiun
interligon kaj ĉi tiun ĵuran interkonsenton, 15 sed kun
tiuj, kiuj staras hodiaŭ ĉi tie antaŭ la Eternulo, nia
Dio, kaj kun tiuj, kiuj ne estas hodiaŭ ĉi tie kun ni. 16
Ĉar vi scias, kiel ni loĝis en la lando Egipta, kaj kiel ni
trairis meze de la popoloj, tra kiuj vi trairis; 17 kaj vi
vidis iliajn abomenaĵojn, kaj iliajn idolojn el ligno kaj
el ŝtono, el arĝento kaj el oro, kiujn ili havas. 18 Eble
troviĝas inter vi viro aŭ virino aŭ familio aŭ tribo, kies
koro deturniĝas hodiaŭ de la Eternulo, nia Dio, por iri
servi al la dioj de tiuj popoloj; eble troviĝas inter vi
radiko, kiu kreskigas maldolĉaĵon kaj absinton; 19 kaj
kiam li aŭdos la vortojn de ĉi tiu malbeno, li benos sin
en sia koro, dirante: Paco estos al mi, malgraŭ tio,
ke mi iros laŭ la deziroj de mia koro; kaj pereos la
trinkintoj kune kun la soifantoj. 20 La Eternulo ne
volos pardoni lin, sed tiam ekflamos la kolero de la
Eternulo kaj Lia severo kontraŭ tiu homo, kaj falos sur
lin la tuta malbeno, kiu estas skribita en ĉi tiu libro,
kaj la Eternulo ekstermos lian nomon el sub la ĉielo;
21 kaj la Eternulo apartigos lin por pereo el ĉiuj triboj
de Izrael, konforme al ĉiuj malbenoj de la interligo,
kiu estas skribita en ĉi tiu libro de instruo. 22 Kaj diros
la venonta generacio, viaj infanoj, kiuj aperos post vi,
kaj la alilandulo, kiu venos el malproksima lando kaj
vidos la plagojn de ĉi tiu lando kaj ĝiajn malsanojn,
per kiuj la Eternulo ĝin frapos — 23 sulfuro kaj salo,
bruligitaĵo estas la tuta lando; ĝi ne estas prisemata
kaj ne naskas, kaj nenia herbo tie elkreskas, simile al
la ruinoj de Sodom kaj Gomora, Adma kaj Ceboim,
kiujn la Eternulo ruinigis en Sia kolero kaj en Sia
furiozo — 24 ĉiuj popoloj diros: Pro kio la Eternulo tiel
agis kun ĉi tiu lando? pro kio estis tiu granda flamo de
kolero? 25 Kaj oni respondos: Pro tio, ke ili forlasis la
interligon de la Eternulo, la Dio de iliaj patroj, kiun Li
faris kun ili, kiam Li elkondukis ilin el la lando Egipta,
26 kaj ili iris kaj servis al aliaj dioj kaj adorkliniĝis al
ili, al dioj, kiujn ili ne konis kaj kiujn Li ne destinis por
ili: 27 pro tio ekflamis la kolero de la Eternulo kontraŭ
tiu lando, kaj Li venigis sur ĝin ĉiujn malbenojn, kiuj
estas skribitaj en ĉi tiu libro; 28 kaj la Eternulo elĵetis
ilin el ilia lando en kolero kaj en furiozo kaj en granda
indigno, kaj Li ĵetis ilin en landon alian, kiel ni vidas
nun. 29 La kaŝitaĵo apartenas al la Eternulo, nia Dio;
kaj la nekaŝitaĵo al ni kaj al niaj gefiloj eterne, por ke
ni plenumu ĉiujn vortojn de ĉi tiu instruo.

**30** Kaj kiam venos sur vin ĉiuj ĉi tiuj aferoj, la beno
kaj la malbeno, kiujn mi prezentis al vi, kaj vi
pentos per via koro inter ĉiuj popoloj, inter kiujn ĵetis
vin la Eternulo, via Dio; 2 kaj kiam vi revenos al la
Eternulo, via Dio, kaj aŭskultos Lian voĉon konforme
al ĉio, kion mi ordonas al vi hodiaŭ, vi kaj viaj gefiloj,
per via tuta koro kaj per via tuta animo: 3 tiam la
Eternulo, via Dio, revenigos viajn kaptitojn, kaj Li
kompatos vin, kaj rekolektos vin el inter ĉiuj popoloj,
inter kiujn disĵetis vin la Eternulo, via Dio. 4 Eĉ se
vi estus forĵetita ĝis la rando de la ĉielo, eĉ el tie
rekolektos vin la Eternulo, via Dio, kaj el tio Li vin
prenos. 5 Kaj la Eternulo, via Dio, venigos vin en la
landon, kiun posedis viaj patroj, kaj vi ĝin ekposedos;
kaj Li faros al vi bonon kaj multigos vin pli ol viajn
patrojn. 6 Kaj la Eternulo, via Dio, cirkumcidos vian
koron kaj la koron de via idaro, por ke vi amu la
Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via
tuta animo, por ke vi vivu. 7 Kaj la Eternulo, via Dio,
venigos ĉiujn ĉi tiujn malbenojn sur viajn malamikojn
kaj sur viajn malamantojn, kiuj persekutis vin. 8 Kaj vi
konvertiĝos kaj aŭskultos la voĉon de la Eternulo, kaj
plenumos ĉiujn Liajn ordonojn, kiujn mi transdonas
al vi hodiaŭ. 9 Kaj la Eternulo, via Dio, donos al vi
abundon en ĉiu faro de viaj manoj, en la frukto de
via ventro kaj en la frukto de via bruto kaj en la
frukto de via tero, al via bono; ĉar denove la Eternulo
ĝojos pri vi, farante al vi bonon, kiel Li ĝojis pri viaj
patroj; 10 se vi aŭskultos la voĉon de la Eternulo,
via Dio, observante Liajn ordonojn kaj Liajn leĝojn,
kiuj estas skribitaj en ĉi tiu libro de instruo, se vi
revenos al la Eternulo, via Dio, per via tuta koro kaj
per via tuta animo. 11 Ĉar ĉi tiu ordono, kiun mi
donas al vi hodiaŭ, ne estas neatingebla por vi, kaj ĝi
ne estas malproksima. 12 Ne en la ĉielo ĝi estas, por
ke oni povu diri: Kiu suprenirus por ni en la ĉielon
kaj prenus ĝin por ni kaj aŭdigus ĝin al ni, por ke
ni ĝin plenumu? 13 Kaj ne trans la maro ĝi estas,
por ke oni povu diri: Kiu irus por ni trans la maron
kaj prenus ĝin por ni kaj aŭdigus ĝin al ni, por ke
ni ĝin plenumu? 14 Sed tre proksime de vi estas la
afero: en via buŝo kaj en via koro, por plenumi ĝin. 15
Rigardu, mi proponis al vi hodiaŭ la vivon kaj bonon,
kaj la morton kaj malbonon; 16 ordonante al vi ami la
Eternulon, vian Dion, iri laŭ Liaj vojoj, kaj observi
Liajn ordonojn kaj Liajn leĝojn kaj Liajn decidojn,
por ke vi vivu kaj multiĝu, kaj por ke vin benu la
Eternulo, via Dio, en la lando, en kiun vi venas, por
ekposedi ĝin. 17 Sed se dekliniĝos via koro kaj vi ne
aŭskultos kaj vi lasos forlogi vin kaj vi adorkliniĝos al
aliaj dioj kaj servos al ili: 18 en tia okazo mi sciigas al
vi hodiaŭ, ke vi pereos, ke vi ne longe vivos sur la
tero, sur kiun vi transiras trans Jordanon, por veni
tien kaj ekposedi ĝin. 19 Mi atestigas pri vi hodiaŭ la
ĉielon kaj la teron: la vivon kaj la morton mi proponis
al vi, la benon kaj la malbenon; elektu la vivon, por ke
vi vivu, vi kaj via idaro, 20 amante la Eternulon, vian
Dion, aŭskultante Lian voĉon kaj alkroĉante vin al Li;
ĉar Li estas via vivo kaj via longatempeco de loĝado
sur la tero, pri kiu la Eternulo ĵuris al viaj patroj, al
Abraham, al Isaak, kaj al Jakob, ke Li donos al ili.

**31** Kaj Moseo iris kaj parolis ĉi tiujn vortojn al la
tuta Izrael. 2 Kaj li diris al ili: Mi havas hodiaŭ
la aĝon de cent dudek jaroj, mi ne povas plu eliri
nek eniri; kaj la Eternulo diris al mi: Vi ne transiros
ĉi tiun Jordanon. 3 La Eternulo, via Dio, mem iros
antaŭ vi; Li ekstermos tiujn popolojn antaŭ vi, kaj
vi heredos ilin; Josuo iros antaŭ vi, kiel la Eternulo
diris. 4 Kaj la Eternulo faros al ili, kiel Li faris al Siĥon
kaj al Og, reĝoj de la Amoridoj, kaj al ilia lando, kiujn
Li ekstermis. 5 Kaj la Eternulo transdonos ilin al vi,
kaj vi agos kun ili laŭ ĉiuj ordonoj, kiujn mi donis
al vi. 6 Estu fortaj kaj kuraĝaj, ne timu kaj ne tremu
antaŭ ili; ĉar la Eternulo, via Dio, mem iros kun vi;
Li ne foriros de vi kaj ne forlasos vin. 7 Kaj Moseo
alvokis Josuon, kaj diris al li antaŭ la okuloj de ĉiuj
Izraelidoj: Estu forta kaj kuraĝa; ĉar vi venigos ĉi tiun
popolon en la landon, pri kiu la Eternulo ĵuris al iliaj
patroj, ke Li donos ĝin al ili, kaj vi ekposedigos ilin. 8
Kaj la Eternulo, kiu mem iros antaŭ vi, Li estos kun
vi, Li ne foriros de vi kaj ne forlasos vin; ne timu,
kaj ne perdu la kuraĝon. 9 Kaj Moseo skribis ĉi tiun
instruon, kaj donis ĝin al la pastroj, idoj de Levi, kiuj
portis la keston de la interligo de la Eternulo, kaj
al ĉiuj plejaĝuloj de Izrael. 10 Kaj Moseo ordonis al
ili, dirante: Post paso de sep jaroj, en la tempo de
la jaro de forlaso, en la festo de laŭboj, 11 kiam la
tuta Izrael venos, por aperi antaŭ la Eternulo, via Dio,
sur la loko, kiun Li elektos, tiam antaŭlegu ĉi tiun
instruon antaŭ la tuta Izrael, antaŭ iliaj oreloj. 12
Kunvenigu la popolon, la virojn kaj la virinojn kaj
la infanojn, kaj viajn fremdulojn, kiuj estos en viaj
urboj, por ke ili aŭdu kaj lernu, kaj timu la Eternulon,

vian Dion, kaj penu plenumi ĉiujn vortojn de ĉi tiu
instruo. **13** Kaj iliaj filoj, kiuj ankoraŭ ne sciis, aŭdos,
kaj lernos timi la Eternulon, vian Dion, dum la tuta
tempo, en kiu vi vivos sur la tero, al kiu vi iras trans
Jordanon, por ekposedi ĝin. **14** Kaj la Eternulo diris al
Moseo: Jen alproksimiĝis viaj tagoj, por morti; alvoku
Josuon, kaj stariĝu en la tabernaklo de kunveno, kaj
Mi donos al li instrukciojn. Kaj Moseo kaj Josuo iris
kaj stariĝis en la tabernaklo de kunveno. **15** Kaj la
Eternulo aperis en la tabernaklo en nuba kolono, kaj
la nuba kolono stariĝis ĉe la pordo de la tabernaklo.
**16** Kaj la Eternulo diris al Moseo: Jen vi iras dormi
kun viaj patroj; kaj ĉi tiu popolo komencos malĉasti
post fremdaj dioj de tiu lando, en kiun ĝi venas, kaj
ĝi forlasos Min kaj rompos Mian interligon, kiun Mi
faris kun ĝi. **17** Kaj ekflamos Mia kolero kontraŭ ĝi en
tiu tago, kaj Mi forlasos ilin kaj kaŝos Mian vizaĝon
for de ili, kaj ili estos konsumitaj, kaj trafos ilin multaj
malfeliĉoj kaj mizeroj; kaj ili diros en tiu tago: Ĉu ne
pro tio, ke nia Dio ne estas inter ni, trafis nin ĉi tiuj
malfeliĉoj? **18** Sed Mi kaŝos Mian vizaĝon en tiu tago
pro ĉiuj malbonagoj, kiujn ili faris, turninte sin al aliaj
dioj. **19** Kaj nun skribu al vi ĉi tiun kanton, kaj instruu
ĝin al la Izraelidoj; metu ĝin en ilian buŝon, por ke
ĉi tiu kanto estu por Mi atesto inter la Izraelidoj. **20**
Kiam Mi venigos ilin en la landon, pri kiu Mi ĵuris
al iliaj patroj kaj en kiu fluas lakto kaj mielo, kaj ili
manĝos kaj satiĝos kaj grasiĝos: tiam ili sin turnos al
aliaj dioj kaj servos al ili, kaj Min ili malestimos kaj
rompos Mian interligon. **21** Sed kiam trafos ilin multaj
malfeliĉoj kaj mizeroj, tiam ĉi tiu kanto sonos antaŭ
ili kiel atesto, ĉar ĝi ne estos forgesita el la buŝo de
ilia idaro. Ĉar Mi konas iliajn pensojn, kiujn ili havas
hodiaŭ, antaŭ ol Mi venigis ilin en la landon, pri kiu
Mi ĵuris. **22** Kaj Moseo skribis ĉi tiun kanton en tiu
tago kaj lernigis ĝin al la Izraelidoj. **23** Kaj Li ordonis
al Josuo, filo de Nun, kaj diris: Estu forta kaj kuraĝa,
ĉar vi venigos la Izraelidojn en la landon, pri kiu Mi
ĵuris al ili; kaj Mi estos kun vi. **24** Kaj kiam Moseo
tute finis la skribadon de la vortoj de ĉi tiu instruo
en libron, **25** tiam Moseo ordonis al la Levidoj, kiuj
portis la keston de interligo de la Eternulo, dirante:
**26** Prenu ĉi tiun libron de la instruo, kaj kuŝigu ĝin
flanke de la kesto de interligo de la Eternulo, via Dio,
por ke ĝi estu tie atesto kontraŭ vi; **27** ĉar mi konas
vian malobeemecon kaj vian malmolan nukon; ja eĉ
nun, kiam mi estas ankoraŭ vivanta inter vi, vi estis
malobeemaj kontraŭ la Eternulo: kio do estos post
mia morto? **28** Kunvenigu al mi ĉiujn plejaĝulojn de
viaj triboj kaj viajn oficistojn, kaj mi parolos antaŭ
iliaj oreloj tiujn vortojn, kaj mi atestigos kontraŭ ili
la ĉielon kaj la teron. **29** Ĉar mi scias, ke post mia
morto vi malboniĝos kaj dekliniĝos de la vojo, pri kiu
mi ordonis al vi; kaj trafos vin mizero en la estonta
tempo pro tio, ke vi faros malbonon antaŭ la okuloj
de la Eternulo, kolerigante Lin per la faroj de viaj
manoj. **30** Kaj Moseo eldiris antaŭ la oreloj de la tuta
komunumo de Izrael la vortojn de ĉi tiu kanto ĝis la
fino:

**32** Atentu, ĉielo, kaj mi parolos; Kaj aŭdu la tero
la vortojn de mia buŝo. **2** Verŝiĝos kiel pluvo
mia instruo, Fluos kiel roso mia parolo, Kiel pluvego
sur verdaĵon Kaj kiel grandaj gutoj sur herbon. **3** Ĉar
la nomon de la Eternulo mi vokas; Donu honoron
al nia Dio. **4** Li estas la Roko; perfektaj estas Liaj
faroj; Ĉar ĉiuj Liaj vojoj estas justaj. Li estas Dio fidela
kaj sen malbonago; Justa kaj verama Li estas. **5** Ili
malboniĝis antaŭ Li, Ili ne estas Liaj infanoj, pro sia
malvirteco; Generacio malhumila kaj malhonesta. **6**
Ĉu al la Eternulo vi tiel repagas, Popolo malnobla
kaj malprudenta? Ĉu ne Li estas via patro, kiu vin
kreis? Ĉu ne Li vin estigis kaj aranĝis? **7** Rememoru
la tempon antikvan, Pripensu la jarojn de la antaŭaj
generacioj; Demandu vian patron, kaj li sciigos al
vi; Viajn maljunulojn, kaj ili diros al vi. **8** Kiam
la Plejaltulo donis landojn al la popoloj, Kiam Li
disloĝigis la homidojn, Li starigis la limojn de la
popoloj Laŭ la nombro de la idoj de Izrael; **9** Ĉar parto
de la Eternulo estas Lia popolo; Jakob estas Lia hereda
mezuritaĵo. **10** Li trovis lin en dezerto, En stepo, kie
regas bruo senviva; Li ĉirkaŭis lin, zorgis pri li, Gardis
lin kiel pupilon de Sia okulo. **11** Kiel aglo vekas sian
neston, Flugpendas super siaj idoj, Tiel Li etendis
Siajn flugilojn, Prenis lin, portis lin sur Siaj flugiloj.
**12** La Eternulo sola kondukis lin, Kaj neniu fremda
dio estis kun Li. **13** Li portis lin sur altaĵon de la tero,
Manĝigis al li produktojn de kampoj, Nutris lin per
mielo el ŝtono Kaj per oleo el granita roko, **14** Per
butero de bovinoj kaj per lakto de ŝafinoj Kun sebo
de ŝafidoj Kaj per ŝafoj de Baŝan kaj per kaproj Kaj
per la graso de la kernoj de tritiko; Kaj vi trinkis la
ŝaŭmantan sangon de vinberoj. **15** Kaj Jeŝurun grasiĝis
kaj malhumiliĝis; Vi grasiĝis, dikiĝis, kaj sebopleniĝis;

Kaj li forlasis la Dion, kiu lin kreis, Kaj li malrespektis
la Rokon de sia savo. 16 Ili incitis Lin per fremdaj dioj,
Per abomenaĵoj ili kolerigis Lin. 17 Ili alportis oferojn
al diabloj, ne al Dio, Al dioj, kiujn ili ne konis, Al
novaj, antaŭ nelonge venintaj, Pri kiuj ne pensis viaj
patroj. 18 La Defendanton, kiu vin naskis, vi perdis
el la memoro, Kaj vi forgesis la Dion, kiu vin estigis.
19 Kaj la Eternulo vidis, Kaj ekabomenis kolere Siajn
filojn kaj Siajn filinojn; 20 Kaj Li diris: Mi kaŝos Mian
vizaĝon for de ili, Mi vidos, kia estos ilia fino; Ĉar ili
estas generacio perfida, Infanoj, kiuj ne havas en si
fidelecon. 21 Ili incitis Min per ne-dio, Kolerigis Min
per siaj vantaĵoj: Tial Mi incitos ilin per ne-popolo,
Per popolo malnobla Mi ilin kolerigos. 22 Ĉar fajro
ekflamis en Mia kolero, Kaj ĝi brulas ĝis la profundoj
de Ŝeol, Kaj ĝi ruinigas la teron kaj ĝiajn produktojn,
Kaj ĝi bruligas la bazojn de la montoj. **(Sheol h7585)** 23
Mi amasigos super ili malfeliĉojn; Miajn sagojn Mi
ĉiujn eluzos kontraŭ ilin. 24 Ili konsumiĝos de malsato
Kaj senfortiĝos de febro kaj de turmenta epidemio;
Kaj la dentojn de bestoj Mi venigos sur ilin Kun la
veneno de rampantoj sur la tero. 25 Ekstere ekstermos
glavo, Kaj en la domoj teruro, Junulon kaj junulinon,
Suĉinfanon kun grizharulo. 26 Mi dirus: Mi disblovos
ilin, Mi neniigos la memoron pri ili inter la homoj;
27 Se Mi ne timus, ke ĉagrenus Min la malamikoj,
Ke eble fieriĝus iliaj premantoj, Kaj dirus: Nia mano
estas potenca, Kaj ne la Eternulo faris ĉion ĉi tion.
28 Ĉar ili estas popolo, kiu perdis la prudenton, Kaj
komprenadon ili ne havas. 29 Se ili estus prudentaj,
ili tion komprenus; Ili pripensus, kia estos ilia fino.
30 Kiel povus unu persekuti milon Kaj du forkurigi
dek milojn, Se ilia Defendanto ilin ne vendus Kaj la
Eternulo ilin ne transdonus? 31 Ilia defendanto ne
estas ja kiel nia Defendanto, Niaj malamikoj mem tion
povas juĝi. 32 Ĉar el la vinberbranĉoj de Sodom estas
iliaj vinberbranĉoj Kaj el la kampoj de Gomora; Iliaj
beroj estas beroj venenaj, Vinberojn maldolĉajn ili
havas. 33 Galo de drakoj estas ilia vino, Kaj pereiga
veneno de aspidoj. 34 Ĉu tio ne estas kaŝita ĉe Mi,
Sigelita en Mia trezorejo? 35 Ĉe Mi estas venĝo kaj
repago, Ĝis la tago, kiam ekŝanceliĝos ilia piedo; Ĉar
proksima estas la tago de ilia malfeliĉo, Kaj rapide
venos tio, kio estas destinita por ili. 36 Ĉar la Eternulo
juĝos Sian popolon, Kaj Li kompatos Siajn sklavojn,
Kiam Li vidos, ke malaperis ilia forto, Ke jam ne
ekzistas malliberulo nek liberulo. 37 Kaj Li diros: Kie
estas iliaj dioj, La fortikaĵo, kiun ili fidis; 38 Kiuj manĝis
la sebon de iliaj buĉoferoj, Trinkis la vinon de iliaj
verŝoferoj? Ili leviĝu kaj helpu vin, Ili estu ŝirmo por
vi! 39 Vidu nun, ke estas Mi, Mi sola, Kaj ne ekzistas
dio krom Mi; Mi mortigas kaj vivigas; Mi frapas kaj
resanigas; Kaj neniu povas savi el Mia mano. 40 Mi
levos al la ĉielo Mian manon, Kaj Mi diros: Mi vivas
eterne. 41 Kiam Mi akrigos Mian brilantan glavon Kaj
Mia mano komencos la juĝadon, Tiam Mi revenĝos al
Miaj malamikoj, Kaj al Miaj malamantoj Mi repagos.
42 Mi ebriigos Miajn sagojn per sango, Kaj Mia glavo
manĝos karnon, El la sango de mortigitoj kaj kaptitoj,
El la kapoj de la estroj de la malamikoj. 43 Gloru, ho
gentoj, Lian popolon; Ĉar Li venĝos pro la sango de
Siaj sklavoj, Kaj Li redonos venĝon al Siaj malamikoj
Kaj pekliberigos Sian teron kaj Sian popolon. 44 Kaj
Moseo venis kaj eldiris ĉiujn vortojn de ĉi tiu kanto
antaŭ la oreloj de la popolo, li kaj Josuo, filo de Nun.
45 Kaj kiam Moseo finis la paroladon de ĉiuj ĉi tiuj
vortoj antaŭ la tuta Izrael, 46 tiam li diris al ili: Enmetu
en vian koron ĉiujn vortojn, per kiuj mi avertas vin
hodiaŭ, kaj transdonu ilin al viaj gefiloj, por ke ili
penu plenumi ĉiujn vortojn de ĉi tiu instruo. 47 Ĉar
ne malgrava afero ĝi estas por vi; sed ĝi estas via
vivo, kaj per ĉi tiu afero vi longe vivos sur la tero,
al kiu vi iras trans Jordanon, por ekposedi ĝin. 48
Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo en la sama tago,
dirante: 49 Supreniru sur ĉi tiun monton Abarim, sur
la monton Nebo, kiu estas en la lando Moaba, kontraŭ
Jeriĥo; kaj rigardu la landon Kanaanan, kiun Mi donas
al la Izraelidoj kiel posedaĵon; 50 kaj mortu sur la
monto, sur kiun vi supreniras, kaj alkolektiĝu al via
popolo, kiel mortis Aaron, via frato, sur la monto
Hor, kaj alkolektiĝis al sia popolo: 51 pro tio, ke vi
pekis kontraŭ Mi inter la Izraelidoj ĉe la Akvo de
Malpaco en Kadeŝ, en la dezerto Cin; pro tio, ke vi ne
aperigis Mian sanktecon inter la Izraelidoj. 52 Ĉar de
malproksime vi vidos la landon, sed vi ne eniros tien,
en la landon, kiun mi donas al la Izraelidoj.

**33** Kaj jen estas la beno, per kiu benis Moseo, la Dia
homo, la Izraelidojn antaŭ sia morto. 2 Li diris:
La Eternulo venis de Sinaj Kaj eklumis al ili de Seir; Li
ekbrilis de la monto Paran Kaj venis el milmiloj da
sanktuloj; Ĉe Lia dekstra flanko estas fajro de leĝo
por ili. 3 Vere Li amas la popolojn; Ĉiuj Liaj sanktuloj
estas en Via mano; Kaj ili falis antaŭ Viaj piedoj, Por

aŭskulti Viajn vortojn. 4 Instruon transdonis al ni
Moseo, Heredaĵon por la komunumo de Jakob. 5 Kaj li
fariĝis reĝo en Jeŝurun, Kiam kunvenis la ĉefoj de la
popolo, Kune la triboj de Izrael. 6 Vivu Ruben, kaj li
ne mortu; Kaj liaj viroj ne estu malmultaj. 7 Kaj ĉi
tion pri Jehuda li diris: Aŭdu, ho Eternulo, la voĉon de
Jehuda, Kaj alkonduku lin al lia popolo; Per siaj manoj
li sin defendos, Kaj Vi estu helpanto kontraŭ liaj
malamikoj. 8 Kaj pri Levi li diris: Viaj signoj de lumo
kaj de justo estu por Via sankta viro, Kiun Vi elprovis
en Masa, Kun kiu Vi malpacis ĉe la Akvo de Malpaco;
9 Kiu diras pri sia patro kaj pri sia patrino: Mi ne
vidis ilin; Kiu ne rekonis siajn fratojn Kaj ne konis
siajn filojn: Ĉar ili observis Viajn dirojn Kaj gardis
Vian interligon; 10 Ili instruu Viajn leĝojn al Jakob Kaj
Vian instruon al Izrael; Ili metu incenson antaŭ Vian
vizaĝon, Kaj bruloferojn sur Vian altaron. 11 Benu,
ho Eternulo, lian forton, Kaj favoru la faron de liaj
manoj; Frapu la lumbon de tiuj, kiuj leviĝas kontraŭ
lin, Kaj de liaj malamantoj, ke ili ne povu releviĝi. 12
Pri Benjamen li diris: La amato de la Eternulo loĝos
sendanĝere ĉe Li; Li protektas lin ĉiutage, Kaj inter
Liaj brakoj li ripozas. 13 Kaj pri Jozef li diris: Benita de
la Eternulo estas lia tero, Per donoj de la ĉielo, per
roso, Kaj per la profundaĵo, kuŝanta malsupre, 14 Kaj
per donoj, produktataj de la suno, Kaj per donoj, kiujn
eligas la lunoj, 15 Kaj per la plejbonaĵoj de la antikvaj
montoj, Kaj per la donoj de la eternaj montetoj, 16 Kaj
per la donoj de la tero kaj de ĝia abundeco. Kaj la
favoro de Tiu, kiu aperis en la arbetaĵo, Venu sur la
kapon de Jozef Kaj sur la verton de la elektito inter
liaj fratoj. 17 Lia unuenaskita bovido estas belega,
Kaj liaj kornoj estas kiel kornoj de bubalo; Per ili li
kornobatos ĉiujn popolojn kune ĝis la randoj de la
tero. Tio estas la dekmiloj de Efraim, Tio estas la miloj
de Manase. 18 Kaj pri Zebulun li diris: Ĝoju, Zebulun,
ĉe via eliro; Kaj Isaĥar, en viaj tendoj. 19 La popolojn
ili vokas sur la monton; Tie ili oferbuĉas oferojn de
justeco; Ĉar ili nutras sin per la riĉaĵo de la maro,
Kaj per trezoroj, kaŝitaj en la sablo. 20 Kaj pri Gad li
diris: Benata estu la disvastiganto de Gad; Kiel leono
li kuŝas, Kaj li disŝiras brakon kune kun la verto. 21
Li elrigardis al si komencaĵon, Ĉar tie la leĝdonanto
destinis por li parton; Kaj li venis kun la ĉefoj de la
popolo, Plenumis la justecon de la Eternulo Kaj Liajn
decidojn pri Izrael. 22 Kaj pri Dan li diris: Dan estas
juna leono, Kiu elsaltas el Baŝan. 23 Kaj pri Naftali li
diris: Naftali estas sata de favoro Kaj plena de beno de
la Eternulo; Okcidenton kaj sudon li posedu. 24 Kaj pri
Aŝer li diris: Benita inter la filoj estas Aŝer; Li estu
amata de siaj fratoj, Kaj li trempu en oleo sian piedon;
25 Fero kaj kupro estu viaj rigliloj; Kaj dum via tuta
vivo daŭru via bonstato. 26 Ne ekzistas simila al Dio,
ho Jeŝurun, Kiu sidas en la ĉielo por via helpo, En Sia
majesto en la nuboj. 27 La Dio antikva estas loĝejo, Kaj
malsupre estas brakoj eternaj. Kaj Li forpelis de antaŭ
vi la malamikon, Kaj diris: Ekstermu. 28 Kaj Izrael
loĝas sendanĝere, sola; La fonto de Jakob estas sur
tero de greno kaj mosto, Kaj lia ĉielo gutigas roson. 29
Feliĉa vi estas, ho Izrael! Kiu estas simila al vi, popolo
helpata de la Eternulo, La ŝildo de via helpo kaj la
glavo de via gloro? Flatos vin viaj malamikoj, Kaj vi
paŝados sur iliaj altaĵoj.

34 Kaj Moseo supreniris de la stepo de Moab sur
la monton Nebo, sur la supron de Pisga, kiu
estas kontraŭ Jeriĥo. Kaj la Eternulo montris al li la
tutan landon Gilead, ĝis Dan, 2 kaj la tutan teron de
Naftali kaj la teron de Efraim kaj Manase kaj la tutan
teron de Jehuda ĝis la ekstrema maro, 3 kaj la teron
sudan kaj la distrikton de la valo de Jeriĥo, la urbo
de Palmoj, ĝis Coar. 4 Kaj la Eternulo diris al li: Jen
estas la lando, pri kiu Mi ĵuris al Abraham, al Isaak,
kaj al Jakob, dirante: Al via idaro Mi ĝin donos. Mi
vidigis ĝin al vi per viaj okuloj, sed tien vi ne eniros. 5
Kaj mortis tie Moseo, la servanto de la Eternulo, en
la lando Moaba, laŭ la diro de la Eternulo. 6 Kaj li
estas enterigita en la valo en la lando Moaba, kontraŭ
Bet-Peor; kaj neniu scias lian tombon ĝis hodiaŭ. 7
Kaj Moseo havis la aĝon de cent dudek jaroj, kiam li
mortis; ne malakriĝis lia okulo, kaj ne malaperis lia
freŝeco. 8 Kaj la Izraelidoj priploris Moseon sur la
stepoj de Moab dum tridek tagoj. Kaj pasis la tagoj
de plorado kaj funebrado pri Moseo. 9 Kaj Josuo, filo
de Nun, estis plena de spirito de saĝeco, ĉar Moseo
metis siajn manojn sur lin; kaj la Izraelidoj aŭskultis
lin, kaj agis, kiel la Eternulo ordonis al Moseo. 10 Ne
aperis plu en Izrael profeto tia, kiel Moseo, kiun la
Eternulo konis, vizaĝon kontraŭ vizaĝo; 11 koncerne
ĉiujn signojn kaj miraklojn, kiujn la Eternulo sendis
lin fari en la lando Egipta super Faraono kaj super ĉiuj
liaj servantoj kaj super lia tuta lando, 12 kaj koncerne
la tutan potencon, kaj ĉiujn mirindajn kaj grandajn

farojn, kiujn Moseo faris antaŭ la okuloj de la tuta Izrael.

# Josuo

1 Post la morto de Moseo, servanto de la Eternulo,
la Eternulo diris al Josuo, filo de Nun, helpanto
de Moseo, jene: 2 Mia servanto Moseo mortis; kaj
nun leviĝu, transiru ĉi tiun Jordanon, vi kaj ĉi tiu
tuta popolo, en la landon, kiun Mi donas al ili, al la
Izraelidoj. 3 Ĉiun lokon, sur kiun paŝos la plando
de via piedo, Mi donas al vi, kiel Mi diris al Moseo.
4 De la dezerto kaj de ĉi tiu Lebanon ĝis la granda
rivero, la rivero Eŭfrato, la tuta lando de la Ĥetidoj,
ĝis la Granda Maro okcidente, estu viaj limoj. 5 Neniu
rezistos al vi dum via tuta vivo; kiel Mi estis kun
Moseo, tiel Mi estos kun vi; Mi ne foriros de vi kaj
Mi ne forlasos vin. 6 Estu forta kaj kuraĝa; ĉar vi
ekposedigos al ĉi tiu popolo la landon, pri kiu Mi
ĵuris al iliaj patroj, ke Mi donos ĝin al ili. 7 Nur estu
forta kaj tre kuraĝa, penante agi laŭ la tuta instruo,
kiun donis al vi Mia servanto Moseo; ne dekliniĝu
de ĝi dekstren nek maldekstren, por ke vi sukcesu
ĉie, kien vi iros. 8 Ĉi tiu libro de la instruo ne foriĝu
de via buŝo, sed meditu pri ĝi tage kaj nokte, por
ke vi zorge plenumu ĉion, kio estas skribita en ĝi;
ĉar tiam vi havos feliĉon sur viaj vojoj, kaj tiam vi
havos sukceson. 9 Jen Mi ordonis al vi: estu forta kaj
kuraĝa; ne havu teruron kaj ne timu; ĉar kun vi estas
la Eternulo, via Dio, ĉie, kien vi iros. 10 Kaj Josuo
ordonis al la oficistoj de la popolo, dirante: 11 Iru tra
la tendaro, kaj ordonu al la popolo, dirante: Pretigu
por vi manĝaĵon, ĉar post tri tagoj vi transiros ĉi
tiun Jordanon, por iri ekposedi la landon, kiun la
Eternulo, via Dio, donas al vi kiel posedaĵon. 12 Kaj
al la Rubenidoj kaj al la Gadidoj kaj al la duontribo
de Manase, Josuo diris jene: 13 Memoru la aferon,
kiun ordonis al vi Moseo, servanto de la Eternulo,
dirante: La Eternulo, via Dio, ripozigis vin, kaj donis
al vi ĉi tiun teron; 14 viaj edzinoj, viaj infanoj, kaj
viaj brutoj restos sur la tero, kiun donis al vi Moseo
transe de Jordan; kaj vi iru armitaj antaŭ viaj fratoj,
ĉiuj, kiuj taŭgas por la milito, kaj helpu ilin, 15 ĝis la
Eternulo ripozigos viajn fratojn, kiel vin, kaj ili ankaŭ
ekposedos la teron, kiun la Eternulo, via Dio, donas al
ili; tiam vi reiros sur la teron de via posedado, kaj vi
posedos ĝin, kiun donis al vi Moseo, servanto de la
Eternulo, transe de Jordan, sur la flanko de sunleviĝo.
16 Kaj ili respondis al Josuo, dirante: Ĉion, kion vi
ordonis, ni faros, kaj ĉien, kien vi sendos nin, ni iros.
17 Tute tiel, kiel ni obeis Moseon, ni obeos vin; nur la
Eternulo, via Dio, estu kun vi, kiel Li estis kun Moseo.
18 Ĉiu, kiu malobeos vian diron kaj ne aŭskultos viajn
vortojn en ĉio, kion vi ordonis al li, estos mortigita.
Nur estu forta kaj kuraĝa.

2 Kaj Josuo, filo de Nun, sendis el Ŝitim du
esplorrigardantojn sekrete, dirinte: Iru, pririgardu
la landon kaj Jeriĥon. Kaj ili iris, kaj venis en la domon
de malĉastistino, kies nomo estis Raĥab, kaj ili dormis
tie. 2 Kaj oni diris al la reĝo de Jeriĥo jene: Jen venis ĉi
tien en la nokto viroj el la Izraelidoj, por esplorrigardi
la landon. 3 Tiam la reĝo de Jeriĥo sendis al Raĥab,
por diri: Elirigu la virojn, kiuj venis al vi, kiuj venis en
vian domon; ĉar por esplorrigardi la tutan landon
ili venis. 4 Sed la virino prenis la du virojn kaj kaŝis
ilin, kaj diris: Efektive venis al mi la viroj, sed mi
ne scias, el kie ili estas; 5 kaj kiam en la mallumo
oni estis fermontaj la pordegon, la viroj eliris; mi
ne scias, kien la viroj iris; postkuru ilin rapide, ĉar
vi kuratingos ilin. 6 Sed ŝi suprenirigis ilin sur la
tegmenton, kaj kaŝis ilin en la trunkoj de lino, kiuj
kuŝis ĉe ŝi sur la tegmento. 7 La viroj postkuris ilin en
la direkto al Jordan ĝis la transirejo; kaj la pordegon
oni fermis, post kiam eliris la postkurantoj. 8 Kaj
antaŭ ol la kaŝitoj kuŝiĝis, ŝi supreniris al ili sur la
tegmenton, 9 kaj ŝi diris al la viroj: Mi scias, ke la
Eternulo transdonis al vi la landon kaj ke teruro pri vi
falis sur nin kaj ke timuliĝis antaŭ vi ĉiuj loĝantoj de
la lando; 10 ĉar ni aŭdis, ke la Eternulo sekigis antaŭ
vi la akvon de la Ruĝa Maro, kiam vi eliris el Egiptujo,
kaj kiel vi agis kun la du reĝoj de la Amoridoj, kiuj
estis transe de Jordan, kun Siĥon kaj kun Og, kiujn vi
ekstermis. 11 Ni aŭdis, kaj ektimis nia koro, kaj en
neniu restis kuraĝo antaŭ vi; ĉar la Eternulo, via Dio,
estas Dio en la ĉielo supre kaj sur la tero malsupre.
12 Kaj nun ĵuru al mi per la Eternulo, ke ĉar mi faris
favorkoraĵon al vi, tial ankaŭ vi faros favorkoraĵon
al la domo de mia patro; kaj donu al mi signon de
vereco, 13 ke vi konservos la vivon al mia patro kaj
al mia patrino kaj al miaj fratoj kaj al miaj fratinoj,
kaj al ĉiu, kiun ili havas, kaj vi savos niajn animojn
kontraŭ morto. 14 Kaj la viroj diris al ŝi: Nia animo
mortu anstataŭ via, se vi ne rakontos pri ĉi tiu nia
afero; kaj kiam la Eternulo donos al ni la landon,
tiam ni faros al vi favorkoraĵon kaj fidelaĵon. 15 Kaj ŝi
malsuprenigis ilin per ŝnuro tra la fenestro; ĉar ŝia

domo estis en la muro de la urbo, kaj ŝi loĝis en la
muro. 16 Kaj ŝi diris al ili: Iru sur la monton, por ke ne
renkontu vin la postkurantoj, kaj kaŝu vin tie dum tri
tagoj, ĝis la postkurantoj revenos; kaj poste vi iros
vian vojon. 17 Kaj la viroj diris al ŝi: Jen kiamaniere ni
estos liberaj de via ĵuro, per kiu vi ĵurigis nin: 18 jen
ni venos en la landon, kaj vi alligu al la fenestro la
ruĝan ŝnuron, per kiu vi nin malsuprenigis; kaj vian
patron kaj vian patrinon kaj viajn fratojn kaj la tutan
familion de via patro kolektu al vi en la domon; 19
kaj se iu eliros el la pordo de via domo eksteren, lia
sango estos sur lia kapo, kaj ni estos senkulpaj; kaj pri
ĉiu, kiu estos kun vi en la domo, lia sango estos sur
nia kapo, se ies mano lin tuŝos. 20 Sed se vi rakontos
ĉi tiun nian aferon, tiam ni estos liberaj de via ĵuro,
per kiu vi ĵurigis nin. 21 Kaj ŝi diris: Ĝi estu, kiel vi
diris. Kaj ŝi foririgis ilin, kaj ili iris; kaj ŝi alligis la
ruĝan ŝnuron al la fenestro. 22 Kaj ili iris, kaj venis
sur la monton, kaj restis tie dum tri tagoj, ĝis revenis
la postkurantoj. Kaj la postkurantoj serĉis sur la tuta
vojo, kaj ne trovis. 23 Tiam la du viroj iris returne, kaj
malsupreniris de la monto, kaj transiĝis, kaj venis al
Josuo, filo de Nun, kaj rakontis al li ĉion, kio okazis al
ili. 24 Kaj ili diris al Josuo: La Eternulo transdonis en
nian manon la tutan landon, kaj ĉiuj loĝantoj de la
lando havas timon antaŭ ni.

3 Kaj Josuo leviĝis frue matene, kaj ili elmoviĝis de
Ŝitim kaj alvenis al Jordan, li kaj ĉiuj Izraelidoj, kaj
ili tradormis tie la nokton, antaŭ ol transiri. 2 Kaj
post paso de tri tagoj la oficistoj iris tra la tendaro,
3 kaj ordonis al la popolo, dirante: Kiam vi ekvidos
la keston de interligo de la Eternulo, via Dio, kaj la
pastrojn Levidojn, kiuj portas ĝin, tiam ekmoviĝu de
viaj lokoj kaj iru post ili. 4 Sed inter vi kaj ĝi devas
esti interspaco de ĉirkaŭ du mil ulnoj da mezuro; ne
alproksimiĝu al ĝi, por ke vi sciu la vojon, laŭ kiu
vi devas iri; ĉar vi ne iris laŭ tiu vojo antaŭe. 5 Kaj
Josuo diris al la popolo: Sanktigu vin, ĉar morgaŭ la
Eternulo faros inter vi miraklojn. 6 Kaj Josuo diris
al la pastroj jene: Prenu la keston de interligo, kaj
preteriru antaŭ la popolo. Kaj ili prenis la keston
de interligo, kaj preteriris antaŭ la popolo. 7 Kaj la
Eternulo diris al Josuo: En ĉi tiu tago Mi komencos
altigi vin antaŭ la okuloj de la tuta Izrael, por ke ili
sciu, ke kiel Mi estis kun Moseo, tiel Mi estos kun vi. 8
Kaj vi ordonu al la pastroj, kiuj portas la keston de
interligo, dirante: Kiam vi venos al la rando de la akvo
de Jordan, tiam stariĝu en Jordan. 9 Kaj Josuo diris
al la Izraelidoj: Aliru ĉi tien, kaj aŭskultu la vortojn
de la Eternulo, via Dio. 10 Kaj Josuo diris: Per tio
vi ekscios, ke la vivanta Dio estas inter vi, kaj ke Li
forpelos de antaŭ vi la Kanaanidojn kaj la Ĥetidojn
kaj la Ĥividojn kaj la Perizidojn kaj la Girgaŝidojn
kaj la Amoridojn kaj la Jebusidojn: 11 jen la kesto de
interligo de la Sinjoro de la tuta tero transiros antaŭ
vi Jordanon. 12 Kaj nun prenu al vi dek du virojn el la
triboj de Izrael, po unu viro el ĉiu tribo. 13 Kaj kiam
la plandoj de la piedoj de la pastroj, kiuj portas la
keston de la Eternulo, la Sinjoro de la tuta tero, haltos
en la akvo de Jordan, la akvo de Jordan detiriĝos,
la akvo, kiu fluas de supre; kaj ĝi stariĝos, kiel unu
muro. 14 Kaj kiam la popolo elmoviĝis el siaj tendoj,
por transiri Jordanon, kaj la pastroj, kiuj portis la
keston de interligo, estis antaŭ la popolo, 15 kaj kiam
la portantoj de la kesto venis al Jordan, kaj la piedoj
de la pastroj, kiuj portis la keston, trempiĝis en la
rando de la akvo (kaj Jordan estis plena ĉe ĉiuj siaj
bordoj dum la tuta tempo de rikoltado), 16 tiam la
akvo, kiu fluis de supre, haltis, stariĝis kiel unu muro,
tre malproksime, ĉe la urbo Adam, kiu estas apud
Cartan; kaj la akvo, kiu fluis al la maro de la stepo,
al la Sala Maro, tute foriris. Kaj la popolo transiris
kontraŭ Jeriĥo. 17 Kaj la pastroj, kiuj portis la keston
de interligo de la Eternulo, staris forte sur seka tero
meze de Jordan, kaj la tuta Izrael iris trans seka tero,
ĝis la tuta popolo transiris Jordanon.

4 Kaj kiam la tuta popolo transiris Jordanon, la
Eternulo diris al Josuo jene: 2 Prenu al vi el la
popolo dek du virojn, po unu viro el ĉiu tribo, 3 kaj
ordonu al ili, dirante: Prenu al vi de ĉi tie, el la mezo
de Jordan, kie firme staris la piedoj de la pastroj, dek
du ŝtonojn, kaj transportu ilin kun vi, kaj metu ilin
sur la nokthaltejo, kie vi pasigos ĉi tiun nokton. 4 Kaj
Josuo alvokis la dek du virojn, kiujn li destinis el la
Izraelidoj, po unu viro el ĉiu tribo; 5 kaj Josuo diris al
ili: Iru antaŭ la kesto de la Eternulo, via Dio, en la
mezo de Jordan, kaj levu al vi sur vian ŝultron ĉiu po
unu ŝtono, laŭ la nombro de la triboj de la Izraelidoj;
6 por ke ĉi tio estu signo inter vi. Se viaj infanoj
morgaŭ demandos vin, dirante: Pro kio estas ĉe vi ĉi
tiuj ŝtonoj? 7 tiam vi diros al ili: Pro tio, ke disflankiĝis
la akvo de Jordan antaŭ la kesto de interligo de la

Eternulo; kiam ĝi iris trans Jordanon, disflankiĝis la
akvo de Jordan. Kaj ĉi tiuj ŝtonoj estos memorigaĵo
por la Izraelidoj eterne. 8 Kaj la Izraelidoj faris tiel,
kiel ordonis Josuo; kaj ili prenis dek du ŝtonojn el
meze de Jordan, kiel la Eternulo diris al Josuo, laŭ la
nombro de la triboj de la Izraelidoj; kaj ili transportis
ilin kun si al la nokthaltejo, kaj kuŝigis ilin tie. 9 Kaj
dek du ŝtonojn Josuo starigis meze de Jordan, sur la
loko, sur kiu staris la piedoj de la pastroj, kiuj portis
la keston de interligo; kaj ili restis tie ĝis hodiaŭ. 10
Kaj la pastroj, kiuj portis la keston, staris meze de
Jordan, ĝis finiĝis ĉio, kion la Eternulo ordonis al
Josuo diri al la popolo, konforme al ĉio, kion Moseo
ordonis al Josuo. Kaj la popolo rapide transiris. 11
Kaj kiam la tuta popolo transiris, tiam transiris la
kesto de la Eternulo kaj la pastroj antaŭ la popolo. 12
Kaj la Rubenidoj kaj la Gadidoj kaj la duontribo de
Manase transiris armitaj antaŭ la Izraelidoj, kiel diris
al ili Moseo. 13 Ĉirkaŭ kvardek mil armitaj militistoj
transiris antaŭ la Eternulo por la milito, sur la stepon
de Jeriĥo. 14 En tiu tago la Eternulo altigis Josuon
antaŭ la okuloj de la tuta Izrael; kaj ili komencis timi
lin, kiel ili timis Moseon dum lia tuta vivo. 15 Kaj la
Eternulo diris al Josuo jene: 16 Ordonu al la pastroj,
kiuj portas la keston de atesto, ke ili supreniru el
Jordan. 17 Kaj Josuo ordonis al la pastroj, dirante:
Supreniru el Jordan. 18 Kaj kiam la pastroj, kiuj portis
la keston de interligo de la Eternulo, supreniris el
Jordan, kaj kiam la plandoj de la pastroj leviĝis sur
la sekan teron, la akvo de Jordan reiris al sia loko
kaj ekfluis kiel antaŭe laŭ ĉiuj siaj bordoj. 19 Kaj la
popolo eliris el Jordan en la deka tago de la unua
monato, kaj ili starigis sian tendaron en Gilgal, oriente
de Jeriĥo. 20 Kaj la dek du ŝtonojn, kiujn ili prenis
el Jordan, Josuo starigis en Gilgal. 21 Kaj li diris al
la Izraelidoj jene: Se en la venonta tempo viaj filoj
demandos siajn patrojn, dirante: Kion signifas ĉi tiuj
ŝtonoj? 22 tiam diru al viaj filoj jene: Sur seka tero
Izrael transiris ĉi tiun Jordanon; 23 ĉar la Eternulo,
via Dio, elsekigis la akvon de Jordan antaŭ vi, ĝis vi
transiris, kiel la Eternulo, via Dio, faris kun la Ruĝa
Maro, kiun Li elsekigis antaŭ ni, ĝis ni transiris; 24
por ke ĉiuj popoloj de la tero sciu, ke la mano de la
Eternulo estas forta, kaj por ke ili timu la Eternulon,
vian Dion, en ĉiu tempo.

5 Kaj kiam ĉiuj reĝoj de la Amoridoj, kiuj loĝis transe
de Jordan okcidente, kaj ĉiuj reĝoj de la Kanaanidoj,
kiuj loĝis apud la maro, aŭdis, ke la Eternulo elsekigis
la akvon de Jordan antaŭ la Izraelidoj, ĝis ili transiris,
tiam ektimis ilia koro, kaj ili ne havis plu kuraĝon
antaŭ la Izraelidoj. 2 En tiu tempo la Eternulo diris al
Josuo: Faru al vi ŝtonajn tranĉilojn, kaj cirkumcidu la
Izraelidojn denove, duan fojon. 3 Kaj Josuo faris al si
ŝtonajn tranĉilojn, kaj cirkumcidis la Izraelidojn sur la
monteto Aralot. 4 Kaj jen estas la kaŭzo, pro kiu Josuo
cirkumcidis: la tuta popolo, kiu eliris el Egiptujo, la
virseksuloj, ĉiuj militkapablaj, mortis en la dezerto,
sur la vojo, kiam ili iris el Egiptujo; 5 ĉar cirkumcidita
estis la tuta popolo, kiu eliris; sed ĉiuj, kiuj naskiĝis en
la dezerto, sur la vojo, kiam ili iris el Egiptujo, ne estis
cirkumciditaj. 6 Ĉar dum kvardek jaroj la Izraelidoj
iris en la dezerto, ĝis la tuta popolo militkapabla, kiu
eliris el Egiptujo, elmortis, pro tio, ke ili ne obeis la
voĉon de la Eternulo; al ili la Eternulo ĵuris, ke Li ne
montros al ili la landon, pri kiu la Eternulo ĵuris al
iliaj patroj, ke Li donos al ni landon, en kiu fluas lakto
kaj mielo. 7 Iliajn filojn Li starigis anstataŭ ili. Tiujn
Josuo cirkumcidis; ĉar ili estis necirkumciditaj, ĉar oni
ne cirkumcidis ilin dum la vojo. 8 Kaj kiam estis finita
la cirkumcidado de la tuta popolo, ili restis sur sia
loko en la tendaro, ĝis ili resaniĝis. 9 Kaj la Eternulo
diris al Josuo: Hodiaŭ Mi derulis de vi la hontindaĵon
de Egiptujo. Kaj tiu loko ricevis la nomon Gilgal ĝis
hodiaŭ. 10 Kaj la Izraelidoj staris tendare en Gilgal,
kaj faris la Paskon en la dek-kvara tago de la monato
vespere sur la stepo de Jeriĥo. 11 Kaj ili manĝis el la
produktoj de la tero en la sekvanta tago post la Pasko,
macojn kaj rostitajn grajnojn en la sama tago. 12 Kaj
la manao ĉesis fali en la sekvanta tago, post kiam ili
manĝis el la produktoj de la tero; kaj la Izraelidoj ne
plu havis manaon, sed ili manĝis la produktojn de la
lando Kanaana en tiu jaro. 13 Kaj okazis, ke kiam Josuo
estis apud Jeriĥo, li levis siajn okulojn, kaj ekvidis,
ke jen viro staras antaŭ li kaj en sia mano li tenas
nudigitan glavon. Kaj Josuo aliris al li, kaj diris al li:
Ĉu vi estas nia, aŭ ĉu el niaj malamikoj? 14 Kaj tiu
diris: Ne, mi estas militestro de la Eternulo, mi nun
venis. Tiam Josuo ĵetis sin vizaĝaltere kaj faris adoron,
kaj diris al li: Kion mia sinjoro diros al sia sklavo? 15
Kaj la militestro de la Eternulo diris al Josuo: Demetu
viajn ŝuojn de viaj piedoj; ĉar la loko, sur kiu vi staras,
estas sankta. Kaj Josuo faris tiel.

**6** (Kaj Jeriĥo estis fermita kaj ŝlosita kontraŭ la
Izraelidoj; neniu eliris, kaj neniu eniris.) 2 Kaj
la Eternulo diris al Josuo: Vidu, Mi transdonis en
vian manon Jeriĥon kaj ĝian reĝon kaj ĝiajn fortajn
militistojn. 3 Ĉirkaŭiru la urbon ĉiuj militistoj,
ĉirkaŭiru la urbon unu fojon; tiel faru dum ses tagoj. 4
Kaj sep pastroj portu sep trumpetojn jubileajn antaŭ la
kesto; kaj en la sepa tago ĉirkaŭiru la urbon sep fojojn,
kaj la pastroj sonigu per la trumpetoj. 5 Kaj kiam oni
ektrumpetos per la jubilea korno kaj vi ekaŭdos la
sonadon de la trumpeto, tiam la tuta popolo ekkriu
per laŭta voĉo; kaj la muro de la urbo falos malsupren,
kaj la popolo eniru, ĉiu rekte antaŭen. 6 Kaj Josuo,
filo de Nun, alvokis la pastrojn, kaj diris al ili: Portu la
keston de interligo, kaj sep pastroj portu sep jubileajn
trumpetojn antaŭ la kesto de la Eternulo. 7 Kaj li
diris al la popolo: Iru, kaj ĉirkaŭiru la urbon, kaj la
armitoj preteriru antaŭ la kesto de la Eternulo. 8 Kaj
post kiam Josuo tion diris al la popolo, sep pastroj,
portantaj sep jubileajn trumpetojn antaŭ la Eternulo,
ekiris kaj ektrumpetis per la trumpetoj; kaj la kesto
de interligo de la Eternulo iris post ili. 9 Kaj la armitoj
iris antaŭ la pastroj, kiuj trumpetis per la trumpetoj,
kaj la resto de la popolo iris post la kesto; oni iris kaj
trumpetis per trumpetoj. 10 Kaj al la popolo Josuo
ordonis, dirante: Ne kriu, kaj ne aŭdigu vian voĉon,
kaj neniu vorto eliru el via buŝo, ĝis la tago, kiam mi
diros al vi, ke vi kriu; tiam vi krios. 11 Kaj la kesto de
la Eternulo ekiris ĉirkaŭ la urbo, ĉirkaŭiris ĝin unu
fojon; kaj ili venis en la tendaron kaj tranoktis en
la tendaro. 12 Kaj Josuo leviĝis frue matene, kaj la
pastroj ekportis la keston de la Eternulo. 13 Kaj la sep
pastroj, kiuj portis sep jubileajn trumpetojn antaŭ la
kesto de la Eternulo, iris kaj senĉese trumpetis per la
trumpetoj; kaj la armitoj iris antaŭ ili, kaj la resto
de la popolo iris post la kesto de la Eternulo, kaj oni
senĉese trumpetis per trumpetoj. 14 Kaj ili ĉirkaŭiris
la urbon en la dua tago unu fojon, kaj revenis en
la tendaron. Tiel oni faris dum ses tagoj. 15 En la
sepa tago ili leviĝis frue, kiam montriĝis la matena
ĉielruĝo, kaj ili ĉirkaŭiris la urbon en la sama maniero
sep fojojn; en tiu sola tago ili ĉirkaŭiris la urbon sep
fojojn. 16 Kaj ĉe la sepa fojo, kiam la pastroj trumpetis
per la trumpetoj, Josuo diris al la popolo: Ekkriu,
ĉar la Eternulo transdonis al vi la urbon. 17 Kaj la
urbo estu sub anatemo de la Eternulo, ĝi kaj ĉio, kio
estas en ĝi; nur la malĉastistino Raĥab restu viva, ŝi
kaj ĉiu, kiu estas kun ŝi en la domo; ĉar ŝi kaŝis la
senditojn, kiujn ni sendis. 18 Sed vi gardu vin kontraŭ
la anatemitaĵo, por ke vi ne anatemiĝu, se vi prenos
ion el la anatemitaĵo, kaj por ke vi ne faligu anatemon
sur la tendaron de Izrael kaj ne malfeliĉigu ĝin. 19
Kaj la tuta arĝento kaj oro, kaj ĉiuj vazoj kupraj kaj
feraj, estu sanktigitaj al la Eternulo; en la trezorejon
de la Eternulo ili venos. 20 Kaj la popolo ekkriis, kaj
oni ektrumpetis per trumpetoj. Kaj kiam la popolo
ekaŭdis la sonadon de la trumpeto, la popolo ekkriis
per laŭta voĉo; kaj la muro falis malsupren, kaj la
popolo eniris en la urbon, ĉiu rekte antaŭen, kaj ili
prenis la urbon. 21 Kaj ili ekstermis per glavo ĉion,
kio estis en la urbo, la virojn kaj virinojn, junulojn kaj
maljunulojn, bovojn kaj ŝafojn kaj azenojn. 22 Kaj al
la du viroj, kiuj esplorrigardis la landon, Josuo diris:
Iru en la domon de la malĉastistino, kaj elkonduku
el tie la virinon, kaj ĉiujn, kiuj estas ĉe ŝi, kiel vi
ĵuris al ŝi. 23 Kaj la junuloj esplorrigardintoj iris, kaj
elkondukis Raĥabon kaj ŝian patron kaj ŝian patrinon
kaj ŝiajn fratojn, kaj ĉiujn, kiuj estis ĉe ŝi, kaj ŝian
tutan familion ili elkondukis, kaj starigis ilin ekster
la tendaron de Izrael. 24 Kaj la urbon oni forbruligis
per fajro, kaj ĉion, kio estis en ĝi; nur la arĝenton
kaj oron kaj la kuprajn kaj ferajn vazojn oni donis
en la trezorejon de la domo de la Eternulo. 25 Kaj la
malĉastistinon Raĥab, kaj la domon de ŝia patro, kaj
ĉiujn, kiuj estis kun ŝi, Josuo lasis vivaj, kaj ŝi restis
inter Izrael ĝis nun; ĉar ŝi kaŝis la senditojn, kiujn
Josuo sendis por esplorrigardi Jeriĥon. 26 Kaj en tiu
tempo Josuo faris ĵuron, dirante: Malbenita antaŭ la
Eternulo estu tiu viro, kiu restarigos kaj konstruos ĉi
tiun urbon Jeriĥo. Sur sia unuenaskito li ĝin fondos,
kaj sur sia plej juna filo li starigos ĝiajn pordegojn. 27
Kaj la Eternulo estis kun Josuo, kaj li estis fama sur la
tuta tero.

**7** Sed la Izraelidoj pekis kontraŭ la anatemo: Aĥan,
filo de Karmi, filo de Zabdi, filo de Zeraĥ, el la
tribo de Jehuda, prenis el la anatemitaĵo, kaj la kolero
de la Eternulo ekflamis kontraŭ la Izraelidoj. 2 Kaj
Josuo sendis virojn el Jeriĥo al Aj, kiu estis apud
Bet-Aven, oriente de Bet-El, kaj li diris al ili jene:
Iru kaj esplorrigardu la landon. Kaj la viroj iris kaj
esplorrigardis Ajon. 3 Kaj ili revenis al Josuo, kaj diris
al li: Ne iru la tuta popolo, nur du mil aŭ tri mil
viroj iru kaj venkobatu Ajon; ne lacigu tien la tutan

popolon, ĉar ili estas malgrandnombraj. 4 Kaj iris
tien el la popolo ĉirkaŭ tri mil viroj; sed ili forkuris
de antaŭ la loĝantoj de Aj. 5 Kaj la loĝantoj de Aj
mortigis el ili tridek ses homojn, kaj persekutis ilin
de la pordego ĝis Ŝebarim, kaj venkobatis ilin sur
la deklivo de la monto; kaj malkuraĝiĝis la koro de
la popolo kaj fariĝis kiel akvo. 6 Tiam Josuo disŝiris
siajn vestojn, kaj ĵetis sin vizaĝaltere antaŭ la keston
de la Eternulo, restante tiel ĝis la vespero, li kaj
la plejaĝuloj de Izrael; kaj ili ŝutis polvon sur siajn
kapojn. 7 Kaj Josuo diris: Ho, mia Sinjoro, Eternulo,
kial Vi transirigis ĉi tiun popolon trans Jordanon,
por transdoni nin en la manon de la Amoridoj, por
pereigi nin? ho, kial ni ne restis sur tiu flanko de
Jordan? 8 Ho, mia Sinjoro! kion mi povas diri, post
kiam Izrael turnis sian dorson al siaj malamikoj? 9
Kiam aŭdos la Kanaanidoj kaj ĉiuj loĝantoj de la lando,
ili ĉirkaŭos nin kaj ekstermos nian nomon de sur
la tero; kaj kion Vi faros por Via granda nomo? 10
Tiam la Eternulo diris al Josuo: Leviĝu! por kio vi ĵetis
vin vizaĝaltere? 11 Izrael pekis, kaj ili agis kontraŭ
Mia interligo, kiun Mi donis al ili, kaj ili prenis el la
anatemitaĵo, kaj ŝtelis, kaj mensoge neis, kaj metis
inter siajn vazojn. 12 Tial la Izraelidoj ne povos rezisti
antaŭ siaj malamikoj, sian dorson ili turnos al siaj
malamikoj, ĉar ili falis sub anatemon; Mi ne estos plu
kun vi, se vi ne malaperigos la anatemitaĵon el inter
vi. 13 Leviĝu, sanktigu la popolon, kaj diru: Sanktigu
vin por morgaŭ; ĉar tiel diris la Eternulo, Dio de Izrael:
Anatemitaĵo estas inter vi, Izrael; vi ne povos rezisti
antaŭ viaj malamikoj, ĝis vi forigos la anatemitaĵon el
inter vi. 14 Kaj vi aliros matene laŭ viaj triboj; kaj la
tribo, kiun montros la Eternulo, aliros laŭ la familioj;
kaj la familio, kiun montros la Eternulo, aliros laŭ la
domoj; kaj la domo, kiun montros la Eternulo, aliros
laŭ apartaj homoj. 15 Kaj tiun, ĉe kiu montriĝos la
anatemitaĵo, oni forbruligu per fajro, lin kaj ĉion, kio
apartenas al li; ĉar li agis kontraŭ la interligo de la
Eternulo, kaj ĉar li faris malnoblaĵon en Izrael. 16 Kaj
Josuo leviĝis frue matene, kaj alirigis Izraelon laŭ liaj
triboj; kaj la montro falis sur la tribon de Jehuda.
17 Kaj li alirigis la tribon de Jehuda, kaj la montro
falis sur la familion de la Zeraĥidoj; kaj li alirigis la
familion de la Zeraĥidoj laŭ apartaj homoj, kaj la
montro falis sur Zabdin. 18 Kaj li alirigis lian domon
laŭ apartaj homoj, kaj la montro falis sur Aĥanon,
filon de Karmi, filo de Zabdi, filo de Zeraĥ, el la tribo
de Jehuda. 19 Tiam Josuo diris al Aĥan: Mia filo! donu
gloron al la Eternulo, Dio de Izrael, kaj faru al Li
konfeson, kaj diru al mi, kion vi faris; ne kaŝu antaŭ
mi. 20 Kaj Aĥan respondis al Josuo, kaj diris: Efektive,
mi pekis antaŭ la Eternulo, Dio de Izrael, kaj tiel kaj
tiel mi faris. 21 Mi vidis inter la militakiraĵo belan
Ŝinaran mantelon, kaj ducent siklojn da arĝento, kaj
unu stangeton da oro, havantan la pezon de kvindek
sikloj, kaj mi ekdeziris ilin kaj prenis ilin; kaj nun
ili estas kaŝitaj en la tero meze de mia tendo, kaj la
arĝento estas sub tio. 22 Kaj Josuo sendis senditojn,
kaj ili kuris en la tendon; kaj montriĝis, ke tio estas
kaŝita en lia tendo kaj la arĝento estas sub tio. 23 Kaj
ili prenis tion el meze de la tendo, kaj alportis al Josuo
kaj al ĉiuj Izraelidoj, kaj elmetis tion antaŭ la Eternulo.
24 Kaj Josuo kune kun la tuta Izrael prenis Aĥanon,
filon de Zeraĥ, kaj la arĝenton kaj la mantelon kaj la
stangeton da oro, kaj liajn filojn kaj liajn filinojn, kaj
liajn bovojn kaj liajn azenojn kaj liajn ŝafojn, kaj lian
tendon, kaj ĉion, kio apartenis al li, kaj elkondukis
ilin en la valon Aĥor. 25 Kaj Josuo diris: Pro tio, ke vi
malĝojigis nin, la Eternulo malĝojigos vin en ĉi tiu
tago. Kaj la tuta Izrael mortigis lin per ŝtonoj; kaj oni
forbruligis ilin per fajro, kaj ĵetis sur ilin ŝtonojn. 26
Kaj oni amasigis super li grandan amason da ŝtonoj,
kiu restis ĝis hodiaŭ. Kaj malaperis la flama kolero de
la Eternulo. Pro tio tiu loko havas la nomon valo Aĥor
ĝis hodiaŭ.

**8** Kaj la Eternulo diris al Josuo: Ne timu, kaj ne
estu malkuraĝa; prenu kun vi ĉiujn militistojn,
kaj leviĝu kaj iru al Aj; vidu, Mi transdonis en vian
manon la reĝon de Aj kaj lian popolon kaj lian urbon
kaj lian landon. 2 Kaj agu kun Aj kaj kun ĝia reĝo,
kiel vi agis kun Jeriĥo kaj kun ĝia reĝo; nur ilian
militakiraĵon kaj iliajn brutojn vi povas rabi por vi.
Faru insidon malantaŭ la urbo. 3 Kaj leviĝis Josuo kaj
ĉiuj militistoj, por iri al Aj; kaj Josuo elektis tridek mil
homojn, bonajn militistojn, kaj sendis ilin nokte, 4
kaj ordonis al ili, dirante: Vidu, vi faros insidon ĉe la
urbo, malantaŭ la urbo; ne tro malproksimiĝu de la
urbo, kaj estu ĉiuj pretaj. 5 Kaj mi, kaj la tuta popolo,
kiu estas kun mi, alproksimiĝos al la urbo. Kaj kiam ili
eliros kontraŭ nin, kiel antaŭe, ni forkuros de ili. 6
Kaj ili eliros post ni, ĝis ni ellogos ilin el la urbo; ĉar
ili diros: Ili forkuras de ni, kiel antaŭe. Kaj ni kuros
de ili. 7 Tiam vi leviĝu el la insido kaj ekposedu la
urbon; kaj la Eternulo, via Dio, transdonos ĝin en vian

manon. 8 Kaj kiam vi okupos la urbon, ekbruligu la
urbon per fajro; faru laŭ la diro de la Eternulo. Vidu,
mi tion ordonas al vi. 9 Kaj Josuo sendis ilin, kaj ili
iris en insidejon, kaj ili eksidis inter Bet-El kaj Aj,
okcidente de Aj. Kaj Josuo pasigis tiun nokton meze
de la popolo. 10 Kaj Josuo leviĝis frue matene, kaj
ordigis la popolon, kaj ekiris li kaj la plejaĝuloj de
Izrael antaŭ la popolo al Aj. 11 Kaj ĉiuj militistoj, kiuj
estis kun li, iris, kaj alproksimiĝis, kaj venis antaŭ
la urbon, kaj starigis sian tendaron norde de Aj; kaj
inter ili kaj Aj estis valo. 12 Kaj li prenis ĉirkaŭ kvin
mil homojn, kaj aranĝis ilin inside inter Bet-El kaj
Aj, okcidente de Aj. 13 Kaj la popolo starigis la tutan
tendaron, kiu estis norde de la urbo, tiel, ke ĝia fina
parto estis okcidente de la urbo. Kaj Josuo iris en
tiu nokto en la mezon de la valo. 14 Kiam la reĝo de
Aj tion ekvidis, tiam la loĝantoj de la urbo rapide
leviĝis kaj eliris kontraŭ Izraelon milite, li kaj lia tuta
popolo, sur difinitan lokon antaŭ la valo. Kaj li ne
sciis, ke estas kontraŭ li insido malantaŭ la urbo. 15
Kaj Josuo kaj la tuta Izrael ŝajnigis sin venkobatitaj
de ili, kaj ekkuris en la direkto al la dezerto. 16 Kaj
ili per krio vokis la tutan popolon, kiu estis en la
urbo, por persekuti ilin; kaj ili postkuris Josuon, kaj
malproksimiĝis de la urbo. 17 Kaj en Aj kaj en Bet-
El restis neniu homo, kiu ne kuris post Izrael. Kaj ili
lasis la urbon malfermita, kaj postkuris Izraelon. 18
Kaj la Eternulo diris al Josuo: Etendu la lancon, kiu
estas en via mano, kontraŭ Ajon; ĉar en vian manon
Mi ĝin transdonos. Kaj Josuo etendis la lancon, kiu
estis en lia mano, kontraŭ la urbon. 19 Kaj la insidanoj
rapide leviĝis de sia loko, kaj ekkuris, kiam li etendis
sian manon, kaj ili venis en la urbon kaj okupis ĝin,
kaj rapide ekbruligis la urbon per fajro. 20 Kaj la
loĝantoj de Aj ekrigardis malantaŭen, kaj vidis, ke
fumo de la urbo iras al la ĉielo. Kaj ili ne havis lokon,
kien forkuri — nek tien nek ĉi tien; kaj la popolo,
kiu estis kurinta al la dezerto, turniĝis kontraŭ la
persekutantojn. 21 Kaj kiam Josuo kaj la tuta Izrael
ekvidis, ke la insidanoj okupis la urbon kaj ke leviĝas
fumo de la urbo, ili turniĝis kaj ekbatis la loĝantojn
de Aj. 22 Kaj tiuj el la urbo eliris renkonte al ili, kaj
ili troviĝis en la mezo inter la Izraelidoj, el kiuj unuj
estis sur unu flanko kaj aliaj sur la dua flanko, kaj
ili batis ilin tiel, ke neniu el ili restis kaj neniu povis
forkuri. 23 Kaj la reĝon de Aj oni kaptis vivan, kaj
alkondukis lin al Josuo. 24 Kaj kiam Izrael mortigis
ĉiujn loĝantojn de Aj sur la kampo, en la dezerto,
kien tiuj ilin postkuris, kaj ĉiuj falis de glavo ĝis plena
ekstermiĝo, tiam ĉiuj Izraelidoj reiris en la urbon Aj
kaj mortigis tie ĉiujn per glavo. 25 Kaj la nombro de
ĉiuj falintoj en tiu tago, viroj kaj virinoj, estis dek
du mil, ĉiuj loĝantoj de Aj. 26 Kaj Josuo ne retiris
sian manon, kiun li etendis kun la lanco, ĝis estis
ekstermitaj ĉiuj loĝantoj de Aj. 27 Nur la brutojn kaj
la militakiraĵon de tiu urbo la Izraelidoj rabis al si,
laŭ la diro de la Eternulo, kiun Li ordonis al Josuo. 28
Kaj Josuo forbruligis la urbon Aj, kaj faris ĝin eterna
ruino, dezertaĵo ĝis hodiaŭ. 29 Kaj la reĝon de Aj li
pendigis sur arbo, kie li restis ĝis la vespero; kaj kiam
la suno subiris, Josuo ordonis, kaj oni deprenis lian
kadavron de la arbo, kaj ĵetis ĝin antaŭ la pordegon
de la urbo, kaj amasigis super ĝi grandan amason da
ŝtonoj, kiu restis ĝis hodiaŭ. 30 Tiam Josuo konstruis
sur la monto Ebal altaron al la Eternulo, Dio de Izrael,
31 kiel ordonis Moseo, servanto de la Eternulo, al la
Izraelidoj, kiel estas skribite en la libro de instruo de
Moseo, altaron el ŝtonoj nehakitaj, sur kiujn oni ne
levis feron. Kaj oni alportis sur ĝi bruloferojn al la
Eternulo, kaj oni buĉis pacoferojn. 32 Kaj li skribis
tie sur la ŝtonoj kopion de la instruo de Moseo, kiun
li skribis antaŭ la Izraelidoj. 33 Kaj la tuta Izrael kaj
liaj plejaĝuloj kaj oficistoj kaj liaj juĝistoj staris ĉe
ambaŭ flankoj de la kesto, kontraŭ la pastroj Levidoj,
kiuj portis la keston de interligo de la Eternulo, kiel
la fremduloj, tiel ankaŭ la indiĝenoj; duono staris
kontraŭ la monto Gerizim, kaj la dua duono kontraŭ
la monto Ebal, kiel ordonis antaŭe Moseo, servanto
de la Eternulo, por beni la popolon. 34 Kaj poste li
laŭte legis ĉiujn vortojn de la instruo, la benon kaj la
malbenon, konforme al ĉio, kio estas skribita en la
libro de la instruo. 35 El ĉio, kion ordonis Moseo, ne
estis eĉ unu vorto, kiun ne antaŭlegis Josuo antaŭ la
tuta komunumo de Izrael, kaj antaŭ la virinoj, infanoj,
kaj fremduloj, kiuj estis inter ili.

9 Kaj kiam aŭdis ĉiuj reĝoj, kiuj loĝis trans Jordan,
sur la monto kaj en la valo, kaj sur la tuta bordo de
la Granda Maro kontraŭ Lebanon, la Ĥetidoj, kaj la
Amoridoj, la Kanaanidoj, la Perizidoj, la Ĥividoj, kaj la
Jebusidoj, 2 ili kolektiĝis kune, por militi unuanime
kontraŭ Josuo kaj kontraŭ Izrael. 3 Kaj la loĝantoj
de Gibeon aŭdis, kion faris Josuo al Jeriĥo kaj al
Aj, 4 kaj ili ankaŭ faris ruzaĵon: ili iris kaj provizis

sin per manĝaĵoj, kaj metis malnovajn sakojn sur
siajn azenojn kaj malnovajn disŝiritajn kaj flikitajn
vinsakojn; 5 kaj ŝuoj malnovaj kaj flikitaj estis sur
iliaj piedoj, kaj vestoj malnovaj estis sur ili, kaj ilia
tuta pano estis malfreŝa kaj ŝimiĝinta. 6 Kaj ili iris
al Josuo en la tendaron ĉe Gilgal, kaj diris al li kaj al
la tuta Izrael: El lando malproksima ni venis; faru
do kun ni interligon. 7 Kaj la Izraelidoj diris al la
Ĥividoj: Eble vi loĝas apude de ni; kiel do ni povas fari
kun vi interligon? 8 Kaj ili diris al Josuo: Ni estas viaj
sklavoj. Kaj Josuo diris al ili: Kiuj vi estas? kaj el kie vi
venas? 9 Kaj ili diris al li: El lando tre malproksima
venis viaj sklavoj pro la nomo de la Eternulo, via
Dio; ĉar ni aŭdis Lian gloron, kaj ĉion, kion Li faris
en Egiptujo, 10 kaj ĉion, kion Li faris al la du reĝoj
de la Amoridoj transe de Jordan, al Siĥon, reĝo de
Ĥeŝbon, kaj al Og, reĝo de Baŝan, kiu loĝis en Aŝtarot.
11 Kaj diris al ni niaj plejaĝuloj kaj ĉiuj loĝantoj de nia
lando jene: Prenu en viajn manojn manĝaĵon por la
vojo, kaj iru renkonte al ili, kaj diru al ili: Ni estas viaj
sklavoj; faru do kun ni interligon. 12 Ĉi tiu nia pano
estis varma, kiam ni prenis ĝin provize el niaj domoj
en la tago, en kiu ni eliris, por iri al vi; kaj nun jen
ĝi malfreŝiĝis kaj ŝimiĝis. 13 Kaj ĉi tiuj niaj felsakoj
kun vino, kiujn ni plenigis novajn, jen ili disfendiĝis;
kaj ĉi tiuj niaj vestoj kaj ŝuoj malnoviĝis pro la tre
longa vojo. 14 Tiam la homoj prenis iom el ilia pano,
kaj la Eternulon ili ne demandis. 15 Kaj Josuo faris
pacon kun ili, kaj starigis interligon kun ili, por lasi
ilin vivaj; kaj la ĉefoj de la komunumo ĵuris al ili. 16
Sed post paso de tri tagoj, post kiam ili faris kun ili
interligon, ili ekaŭdis, ke ili estas iliaj najbaroj kaj
loĝas apude de ili. 17 Kaj la Izraelidoj elmoviĝis, kaj
venis al iliaj urboj en la tria tago; iliaj urboj estis
Gibeon kaj Kefira kaj Beerot kaj Kirjat-Jearim. 18 Kaj la
Izraelidoj ne batis ilin, ĉar la estroj de la komunumo
ĵuris al ili per la Eternulo, Dio de Izrael. Kaj la tuta
komunumo ekmurmuris kontraŭ la estroj. 19 Kaj ĉiuj
estroj diris al la tuta komunumo: Ni ĵuris al ili per
la Eternulo, Dio de Izrael, kaj nun ni ne povas tuŝi
ilin; 20 tion ni faros al ili: ni lasu ilin vivaj, por ke ne
trafu nin kolero pro la ĵuro, kiun ni ĵuris al ili. 21 Kaj
la estroj diris al ili: Ili vivu. Kaj ili fariĝis lignohakistoj
kaj akvoportistoj por la tuta komunumo, kiel diris
al ili la estroj. 22 Kaj Josuo alvokis ilin, kaj diris al
ili jene: Kial vi nin trompis, dirante, ke vi estas tre
malproksimaj de ni, dum vi loĝas apude de ni? 23
estu do nun malbenitaj: ne ĉesiĝu inter vi sklavoj kaj
lignohakistoj kaj akvoportistoj por la domo de mia
Dio. 24 Kaj ili respondis al Josuo kaj diris: Estis dirite
al viaj sklavoj, ke la Eternulo, via Dio, promesis al Sia
servanto Moseo, ke Li donos al vi la tutan landon
kaj ekstermos antaŭ vi ĉiujn loĝantojn de la lando;
tial ni tre ektimis antaŭ vi pri nia vivo, kaj ni faris
tiun aferon. 25 Kaj nun jen ni estas en via mano: kiel
vi trovas bona kaj justa agi kun ni, tiel agu. 26 Kaj
li agis kun ili tiel: li savis ilin kontraŭ la manoj de
la Izraelidoj, kaj ĉi tiuj ne mortigis ilin. 27 Sed Josuo
destinis al ili en tiu tago, ke ili estu lignohakistoj kaj
akvoportistoj por la komunumo kaj por la altaro de la
Eternulo, ĝis la nuna tago, sur la loko, kiun Li elektos.

10 Kiam Adoni-Cedek, reĝo de Jerusalem, aŭdis, ke
Josuo prenis Ajon kaj ekstermis ĝin; ke kiel li
agis kun Jeriĥo kaj kun ĝia reĝo, tiel li agis kun Aj kaj
kun ĝia reĝo; kaj ke la loĝantoj de Gibeon faris pacon
kun Izrael kaj restis inter ili: 2 tiam ili tre ektimis; ĉar
Gibeon estis urbo granda, kiel unu el la reĝaj urboj,
kaj ĝi estis pli granda ol Aj, kaj ĉiuj ĝiaj loĝantoj estis
homoj fortaj. 3 Kaj Adoni-Cedek, reĝo de Jerusalem,
sendis al Hoham, reĝo de Ĥebron, kaj al Piram, reĝo
de Jarmut, kaj al Jafia, rego de Laĥiŝ, kaj al Debir, reĝo
de Eglon, por diri: 4 Venu al mi kaj helpu min, ke ni
venkobatu Gibeonon pro tio, ke ĝi faris pacon kun
Josuo kaj kun la Izraelidoj. 5 Kaj kuniĝis kaj iris la
kvin reĝoj de la Amoridoj, la reĝo de Jerusalem, la
reĝo de Ĥebron, la reĝo de Jarmut, la reĝo de Laĥiŝ,
la reĝo de Eglon, ili kaj ilia tuta militistaro; kaj ili
starigis tendarojn ĉirkaŭ Gibeon kaj ekmilitis kontraŭ
ĝi. 6 Tiam la loĝantoj de Gibeon sendis al Josuo en la
tendaron ĉe Gilgal, por diri: Ne forprenu viajn manojn
de viaj sklavoj; venu al ni rapide kaj savu nin kaj helpu
nin, ĉar kolektiĝis kontraŭ ni ĉiuj reĝoj de la Amoridoj,
kiuj loĝas sur la monto. 7 Kaj Josuo eliris el Gilgal, li
kaj la tuta militistaro kun li, kaj ĉiuj militotaŭguloj.
8 Kaj la Eternulo diris al Josuo: Ne timu ilin; ĉar en
vian manon Mi transdonis ilin; neniu el ili povos
rezisti antaŭ vi. 9 Kaj Josuo venis al ili neatendite;
la tutan nokton li iris el Gilgal. 10 Kaj la Eternulo
konfuzegis ilin antaŭ Izrael, kaj ĉi tiu batis ilin per
granda venkobato en Gibeon, kaj persekutis ilin laŭ la
vojo, kiu suprenkondukas al Bet-Ĥoron, kaj batis ilin
ĝis Azeka kaj ĝis Makeda. 11 Kaj kiam ili, forkurante
de la Izraelidoj, estis sur la deklivo de Bet-Ĥoron, la

Eternulo ĵetadis sur ilin grandajn ŝtonojn el la ĉielo,
ĝis Azeka, kaj ili mortis; pli granda estis la nombro de
tiuj, kiuj mortis de la ŝtonoj de hajlo, ol la nombro
de tiuj, kiujn la Izraelidoj mortigis per la glavo. 12
Tiam Josuo parolis al la Eternulo en la tago, en kiu la
Eternulo transdonis la Amoridojn al la Izraelidoj; kaj
li diris antaŭ la ĉeestanta Izrael: Suno, haltu super
Gibeon, Kaj luno super la valo de Ajalon. 13 Kaj la suno
haltis, kaj la luno staris tiel longe, Kiel la popolo faris
venĝon al siaj malamikoj. Tio estas ja skribita en la
libro de la Justulo. Kaj la suno staris meze de la ĉielo,
kaj ne rapidis subiri preskaŭ dum tuta tago. 14 Kaj
nek antaŭe nek poste estis tago simila al tiu, en kiu
la Eternulo obeis la voĉon de homo; ĉar la Eternulo
batalis por Izrael. 15 Kaj Josuo kune kun la tuta Izrael
revenis en la tendaron ĉe Gilgal. 16 Kaj forkuris tiuj
kvin reĝoj kaj kaŝis sin en kaverno en Makeda. 17 Kaj
oni sciigis al Josuo, dirante: Estas trovitaj la kvin reĝoj,
kaŝitaj en kaverno en Makeda. 18 Tiam Josuo diris:
Alrulu grandajn ŝtonojn al la aperturo de la kaverno,
kaj starigu ĉe ĝi homojn, por gardi ĝin; 19 sed vi ne
haltu, persekutu viajn malamikojn kaj ekstermu iliajn
malantaŭajn taĉmentojn; ne permesu al ili veni en
iliajn urbojn; ĉar la Eternulo, via Dio, transdonis ilin
en viajn manojn. 20 Kaj kiam Josuo kaj la Izraelidoj
finis bati ilin per tre granda venkobato ĝis preskaŭ
plena ekstermo, kaj la restintoj el ili forkuris en la
fortikigitajn urbojn, 21 kaj la tuta popolo revenis
al Josuo en la tendaron en Makedan sendifekta, kaj
neniu movis sian langon kontraŭ la Izraelidojn, 22
tiam Josuo diris: Malfermu la aperturon de la kaverno,
kaj elkonduku al mi tiujn kvin reĝojn el la kaverno. 23
Kaj oni faris tiel, kaj oni elkondukis al li tiujn kvin
reĝojn el la kaverno: la reĝon de Jerusalem, la reĝon
de Ĥebron, la reĝon de Jarmut, la reĝon de Laĥiŝ,
la reĝon de Eglon. 24 Kaj kiam oni elkondukis tiujn
reĝojn al Josuo, tiam Josuo alvokis ĉiujn Izraelidojn,
kaj diris al la estroj de la militistoj, kiuj iris kun li:
Alproksimiĝu, metu viajn piedojn sur la kolojn de
ĉi tiuj reĝoj; kaj ili aliris, kaj metis siajn piedojn sur
iliajn kolojn. 25 Kaj Josuo diris al ili: Ne timu kaj ne
tremu, estu fortaj kaj kuraĝaj; ĉar tiel la Eternulo
faros al ĉiuj viaj malamikoj, kontraŭ kiuj vi militas.
26 Kaj poste Josuo frapis ilin, kaj mortigis ilin, kaj
pendigis ilin sur kvin arboj; kaj ili pendis sur la arboj
ĝis la vespero. 27 Kaj post la subiro de la suno Josuo
ordonis, kaj oni deprenis ilin de la arboj, kaj ĵetis ilin
en la kavernon, en kiu ili estis kaŝintaj sin; kaj oni
almetis al la aperturo de la kaverno grandajn ŝtonojn,
kiuj restis ĝis la nuna tago. 28 Kaj Makedan Josuo
prenis en tiu sama tago, kaj batis ĝin per glavo, ankaŭ
ĝian reĝon; kaj li ekstermis ilin kaj ĉion vivantan, kio
estis en ĝi; li lasis neniun restanton. Kaj li agis kun la
reĝo de Makeda, kiel li agis kun la reĝo de Jeriĥo. 29
Kaj Josuo kune kun la tuta Izrael transiris el Makeda
al Libna, kaj militis kontraŭ Libna. 30 Kaj la Eternulo
transdonis ankaŭ ĝin kaj ĝian reĝon en la manon de
Izrael; kaj li per glavo batis ĝin kaj ĉion vivantan, kio
estis en ĝi; li lasis en ĝi neniun restanton. Kaj li agis
kun ĝia reĝo, kiel li agis kun la reĝo de Jeriĥo. 31
Kaj Josuo kune kun la tuta Izrael transiris el Libna
al Laĥiŝ, kaj starigis tendaron ĉirkaŭ ĝi, kaj militis
kontraŭ ĝi. 32 Kaj la Eternulo transdonis Laĥiŝon en la
manon de Izrael, kaj li prenis ĝin en la dua tago, kaj
per glavo ekstermis ĝin kaj ĉion vivantan en ĝi, simile
al ĉio, kion li faris al Libna. 33 Tiam venis Horam,
reĝo de Gezer, por alporti helpon al Laĥiŝ; sed Josuo
venkobatis lin kaj lian popolon tiel, ke li lasis al li
neniun restanton. 34 Kaj Josuo kune kun la tuta Izrael
transiris el Laĥiŝ al Eglon, kaj starigis tendaron ĉirkaŭ
ĝi, kaj militis kontraŭ ĝi. 35 Kaj ili prenis ĝin en tiu
tago, kaj ekstermis ĝin per glavo, kaj ĉion vivantan en
ĝi li ekstermis en tiu tago, simile al ĉio, kion li faris al
Laĥiŝ. 36 Kaj Josuo kune kun la tuta Izrael iris el Eglon
al Ĥebron, kaj militis kontraŭ ĝi. 37 Kaj ili prenis ĝin,
kaj per glavo ekstermis ĝin kaj ĝian reĝon kaj ĉiujn
ĝiajn urbojn kaj ĉion vivantan, kio estis en ĝi; li lasis
neniun restanton, simile al ĉio, kion li faris al Eglon;
kaj li ekstermis ĝin, kaj ĉion, kio vivis en ĝi. 38 Kaj
Josuo kune kun la tuta Izrael iris returne al Debir,
kaj militis kontraŭ ĝi. 39 Kaj li prenis ĝin kaj ĝian
reĝon kaj ĉiujn ĝiajn urbojn, kaj batis ilin per glavo,
kaj ekstermis ĉion vivantan, kio estis en ĝi; li lasis
neniun restanton; kiel li faris al Ĥebron, tiel li faris al
Debir kaj al ĝia reĝo, kaj kiel li faris al Libna kaj al ĝia
reĝo. 40 Kaj Josuo venkobatis la tutan landon sur la
monto, kaj la sudan kaj la malaltan kaj la deklivan,
kaj ĉiujn iliajn reĝojn; li lasis neniun restanton, kaj li
ekstermis ĉion vivantan, kiel ordonis la Eternulo, Dio
de Izrael. 41 Kaj Josuo batis ilin de Kadeŝ-Barnea ĝis
Gaza, kaj la tutan landon Goŝen, ĝis Gibeon. 42 Kaj
ĉiujn tiujn reĝojn kaj iliajn landojn Josuo prenis per
unu fojo; ĉar la Eternulo, Dio de Izrael, batalis por

Izrael. 43 Kaj Josuo kune kun la tuta Izrael revenis en
la tendaron, en Gilgalon.

**11** Kiam tion aŭdis Jabin, reĝo de Ĥacor, li sendis
al Jobab, reĝo de Madon, kaj al la reĝo de Ŝimron
kaj al la reĝo de Aĥŝaf, 2 kaj al la reĝoj, kiuj loĝis norde
sur la monto, kaj sur la stepo sude de Kinerot, kaj sur
la malaltaĵo, kaj en Nafot-Dor apud la maro, 3 al la
Kanaanidoj oriente kaj okcidente, kaj al la Amoridoj
kaj Ĥetidoj kaj Perizidoj, kaj Jebusidoj sur la monto,
kaj al la Ĥividoj sub Ĥermon en la lando Micpa. 4
Kaj eliris ili kaj ilia tuta militistaro kun ili, granda
nombro da homoj, kiel la sablo sur la bordo de la
maro, kaj tre multe da ĉevaloj kaj ĉaroj. 5 Kaj kuniĝis
ĉiuj tiuj reĝoj, kaj venis kaj starigis siajn tendarojn
kune apud la akvo Merom, por batali kontraŭ Izrael. 6
Kaj la Eternulo diris al Josuo: Ne timu ilin, ĉar morgaŭ
en ĉi tiu tempo Mi transdonos ilin ĉiujn mortigotajn
al Izrael; iliajn ĉevalojn vi lamigos, kaj iliajn ĉarojn vi
forbruligos per fajro. 7 Kaj eliris kontraŭ ilin Josuo
kune kun ĉiuj militistoj subite al la akvo Merom, kaj
ĵetis sin sur ilin. 8 Kaj la Eternulo transdonis ilin
en la manojn de la Izraelidoj, kaj ĉi tiuj batis ilin,
kaj persekutis ilin ĝis Granda Cidon kaj ĝis Misrefot-
Maim, kaj ĝis la valo de Micpe oriente, kaj batis ilin
tiel, ke ili lasis al ili neniun restanton. 9 Kaj Josuo agis
kun ili tiel, kiel diris al li la Eternulo: iliajn ĉevalojn li
lamigis, kaj iliajn ĉarojn li forbruligis per fajro. 10 Kaj
en tiu tempo Josuo iris returne, kaj prenis Ĥacoron,
kaj ĝian reĝon li mortigis per glavo; ĉar Ĥacor antaŭe
estis la ĉefa el ĉiuj tiuj regnoj. 11 Kaj ili mortigis
per glavo ĉion vivantan, kio estis en ĝi; ili ekstermis
tiel, ke restis neniu animo; kaj Ĥacoron li forbruligis
per fajro. 12 Kaj ĉiujn urbojn de tiuj reĝoj kaj ĉiujn
iliajn reĝojn Josuo prenis, kaj mortigis ilin per glavo,
ekstermis ilin, kiel ordonis Moseo, servanto de la
Eternulo. 13 Sed ĉiujn urbojn, kiuj staris sur montetoj,
la Izraelidoj ne forbruligis; nur Ĥacoron solan Josuo
forbruligis. 14 Kaj la tutan akireblaĵon el tiuj urboj kaj
la brutojn la Izraelidoj rabis al si; nur ĉiujn homojn ili
mortigis per glavo, ĝis ili ekstermis ilin, restigante
neniun animon. 15 Kiel la Eternulo ordonis al Sia
servanto Moseo, tiel Moseo ordonis al Josuo, kaj tiel
faris Josuo; li mankigis nenion el ĉio, kion la Eternulo
ordonis al Moseo. 16 Tiamaniere Josuo prenis tiun
tutan landon, la monton kaj la tutan sudan parton kaj
la tutan landon Goŝen kaj la malaltaĵon kaj la stepon
kaj la monton de Izrael kun ĝia bazo; 17 de la monto
Ĥalak, kiu leviĝas en la direkto al Seir, ĝis Baal-Gad en
la valo de Lebanon, sub la monto Ĥermon; kaj ĉiujn
iliajn reĝojn li prenis, kaj batis ilin kaj mortigis ilin. 18
Dum longa tempo Josuo militis kontraŭ ĉiuj tiuj reĝoj.
19 Ne ekzistis urbo, kiu faris pacon kun la Izraelidoj,
krom la Ĥividoj, loĝantoj en Gibeon; ĉiujn ili prenis
per milito. 20 Ĉar de la Eternulo venis la obstiniĝo de
ilia koro al milito kontraŭ Izrael, por ekstermi ilin, por
ke ne estu indulgo por ili, sed por ekstermi ilin plene,
kiel la Eternulo ordonis al Moseo. 21 Kaj en tiu tempo
venis Josuo, kaj ekstermis la Anakidojn sur la monto,
en Ĥebron, en Debir, en Anab, kaj sur la tuta monto de
Jehuda kaj sur la monto de Izrael; kun iliaj urboj Josuo
ekstermis ilin. 22 Ne restis Anakidoj en la lando de la
Izraelidoj; nur en Gaza, en Gat, kaj en Aŝdod ili restis.
23 Tiamaniere Josuo prenis la tutan landon, konforme
al ĉio, kion la Eternulo diris al Moseo; kaj Josuo donis
ĝin kiel heredan posedaĵon al Izrael, laŭ iliaj partoj,
laŭ iliaj triboj. Kaj la lando trankviliĝis de milito.

**12** Kaj jen estas la reĝoj de la lando, kiujn venkobatis
la Izraelidoj, kaj kies landon ili ekposedis transe
de Jordan oriente, de la torento Arnon ĝis la monto
Ĥermon, kaj la tutan stepon en la oriento: 2 Siĥon,
reĝo de la Amoridoj, kiu loĝis en Ĥeŝbon, kaj regis
de Aroer, kiu troviĝas sur la bordo de la torento
Arnon, la mezon de la valo, kaj duonon de Gilead,
ĝis la torento Jabok, limo de la Amonidoj; 3 kaj la
stepon ĝis la maro Kinerot, oriente, kaj ĝis la maro de
la stepo, la Sala Maro, oriente en la direkto al Bet-
Jeŝimot, kaj sude la bazon de la deklivo de Pisga; 4
kaj la regiono de Og, reĝo de Baŝan, restinto el la
Rafaidoj, kiu loĝis en Aŝtarot kaj Edrei, 5 kaj regis la
monton Ĥermon kaj Salĥan kaj la tutan Baŝanon ĝis
la limo de la Geŝuridoj kaj Maaĥatidoj, kaj duonon de
Gilead ĝis la limo de Siĥon, reĝo de Ĥeŝbon. 6 Moseo,
servanto de la Eternulo, kaj la Izraelidoj venkobatis
ilin; kaj Moseo, servanto de la Eternulo, donis la
landon kiel posedaĵon al la Rubenidoj kaj al la Gadidoj
kaj al la duontribo de Manase. 7 Kaj jen estas la reĝoj
de la lando, kiujn venkobatis Josuo kaj la Izraelidoj
transe de Jordan, okcidente, de Baal-Gad en la valo de
Lebanon, ĝis la monto Ĥalak, kiu leviĝas en la direkto
al Seir; kaj Josuo donis ĝin al la triboj de Izrael kiel
posedaĵon laŭ iliaj partoj; 8 sur la monto kaj sur la
malaltaĵo kaj en la stepo kaj sur la deklivoj kaj en

la dezerto kaj sude, la Ĥetidoj, la Amoridoj, kaj la
Kanaanidoj, la Perizidoj, la Ĥividoj, kaj la Jebusidoj: 9
la reĝo de Jeriĥo, unu; la reĝo de Aj, kiu estas flanke
de Bet-El, unu; 10 la reĝo de Jerusalem, unu; la reĝo
de Ĥebron, unu; 11 la reĝo de Jarmut, unu; la reĝo
de Laĥiŝ, unu; 12 la reĝo de Eglon, unu; la reĝo de
Gezer, unu; 13 la reĝo de Debir, unu; la reĝo de Geder,
unu; 14 la reĝo de Ĥorma, unu; la reĝo de Arad, unu;
15 la reĝo de Libna, unu; la reĝo de Adulam, unu; 16
la reĝo de Makeda, unu; la reĝo de Bet-El, unu; 17
la reĝo de Tapuaĥ, unu; la reĝo de Ĥefer, unu; 18 la
reĝo de Afek, unu; la reĝo de Laŝaron, unu; 19 la reĝo
de Madon, unu; la reĝo de Ĥacor, unu; 20 la reĝo de
Ŝimron-Meron, unu; la reĝo de Aĥŝaf, unu; 21 la reĝo
de Taanaĥ, unu; la reĝo de Megido, unu; 22 la reĝo de
Kedeŝ, unu; la reĝo de Jokneam ĉe Karmel, unu; 23 la
reĝo de Dor en Nafot-Dor, unu; la reĝo de la popoloj
en Gilgal, unu; 24 la reĝo de Tirca, unu. La nombro de
ĉiuj reĝoj estis tridek unu.

**13** Josuo maljuniĝis, atingis profundan aĝon, kaj
la Eternulo diris al li: Vi maljuniĝis, atingis
profundan aĝon, kaj da tero restas ankoraŭ tre multe
por ekposedi. 2 Jen estas la tero, kiu restas: ĉiuj
regionoj de la Filiŝtoj, kaj la tuta lando de la Geŝuridoj;
3 komencante de Ŝiĥor, kiu estas antaŭ Egiptujo, ĝis
la limoj de Ekron norde, kiu estas alkalkulata al la
lando de la Kanaanidoj; kvin regantoj Filiŝtaj: de Gaza,
kaj de Aŝdod, de Aŝkelon, de Gat, kaj de Ekron; 4 kaj
la Avidoj sude; la tuta lando de la Kanaanidoj, kaj
Meara de la Cidonanoj, ĝis Afek, ĝis la limoj de la
Amoridoj; 5 kaj la lando de la Gebalanoj, kaj la tuta
Lebanon oriente de Baal-Gad, sub la monto Ĥermon,
ĝis Ĥamat; 6 ĉiuj loĝantoj de la montoj, de Lebanon
ĝis Misrefot-Maim, ĉiuj Cidonanoj. Mi forpelos ilin de
antaŭ la Izraelidoj; dividu ĉion kiel partojn heredajn
por Izrael, kiel Mi ordonis al vi. 7 Kaj nun dividu ĉi
tiun landon en heredajn partojn por la naŭ triboj
kaj por la duontribo de Manase. 8 Kun ĉi tiu tribo la
Rubenidoj kaj la Gadidoj prenis sian heredan parton,
kiun donis al ili Moseo transe de Jordan oriente,
kiel donis al ili Moseo, servanto de la Eternulo; 9 de
Aroer, kiu estas sur la bordo de la torento Arnon,
kaj la urbon, kiu estas meze de la valo, kaj la tutan
ebenaĵon Medba ĝis Dibon; 10 kaj ĉiujn urbojn de
Siĥon, reĝo de la Amoridoj, kiu regis en Ĥeŝbon,
ĝis la limo de la Amonidoj; 11 kaj Gileadon, kaj la
regionon de la Geŝuridoj kaj Maaĥatidoj, kaj la tutan
monton Ĥermon, kaj la tutan Baŝanon ĝis Salĥa; 12 la
tutan regnon de Og en Baŝan, kiu regis en Aŝtarot kaj
Edrei. Li restis el la Rafaidoj. Kaj Moseo venkobatis
ilin, kaj forpelis ilin. 13 Sed la Izraelidoj ne forpelis
la Geŝuridojn kaj la Maaĥatidojn; kaj la Geŝuridoj
kaj Maahatidoj restis inter la Izraelidoj ĝis nun. 14
Nur al la tribo de Levi li ne donis heredan parton;
la fajroferoj de la Eternulo, Dio de Izrael, estas ilia
hereda parto, kiel Li diris al li. 15 Kaj Moseo donis
al la tribo de la Rubenidoj laŭ iliaj familioj. 16 Kaj
ilia regiono estis de Aroer, kiu estas sur la bordo de
la torento Arnon, kaj la urbo, kiu estas meze de la
valo, kaj la tuta ebenaĵo ĝis Medba, 17 Ĥeŝbon, kaj ĉiuj
ĝiaj urboj, kiuj estas sur la ebenaĵo, Dibon kaj Bamot-
Baal kaj Bet-Baal-Meon 18 kaj Jahac kaj Kedemot kaj
Mefaat 19 kaj Kirjataim kaj Sibma kaj Ceret-Ŝaĥar sur
la monto Emek 20 kaj Bet-Peor kaj la deklivoj de Pisga
kaj Bet-Jeŝimot, 21 kaj ĉiuj urboj de la ebenaĵo, kaj la
tuta regno de Siĥon, reĝo de la Amoridoj, kiu regis
en Ĥeŝbon, kaj kiun mortigis Moseo, kiel ankaŭ la
Midjanajn princojn Evi kaj Rekem kaj Cur kaj Ĥur kaj
Reba, princojn de Siĥon, kiuj loĝis en la lando. 22
Kaj Bileamon, filon de Beor, la sorĉiston, mortigis la
Izraelidoj per glavo kune kun la aliaj mortigitoj. 23 Kaj
limo de la Rubenidoj estis Jordan kaj ĝia regiono. Tio
estas la posedaĵo de la Rubenidoj laŭ iliaj familioj, la
urboj kaj iliaj vilaĝoj. 24 Kaj Moseo donis al la tribo de
Gad, al la Gadidoj, laŭ iliaj familioj. 25 Kaj ilia regiono
estis Jazer, kaj ĉiuj urboj de Gilead, kaj duono de la
lando de la Amonidoj, ĝis Aroer, kiu estas antaŭ Raba;
26 kaj de Ĥeŝbon ĝis Ramat-Micpe, kaj Betonim; kaj de
Maĥanaim ĝis la limo de Debir; 27 kaj en la valo, Bet-
Haram kaj Bet-Nimra kaj Sukot kaj Cafon, la restaĵo
de la regno de Siĥon, reĝo de Ĥeŝbon; limo estis
Jordan ĝis la fino de la maro Kineret, transe de Jordan,
oriente. 28 Tio estas la posedaĵo de la Gadidoj laŭ iliaj
familioj, la urboj kaj iliaj vilaĝoj. 29 Kaj Moseo donis al
la duontribo de Manase; kaj tio estis por la duontribo
de Manase laŭ iliaj familioj. 30 Kaj ilia regiono estis:
de Maĥanaim la tuta Baŝan, la tuta regno de Og, reĝo
de Baŝan, kaj ĉiuj Vilaĝoj de Jair, kiuj estas en Baŝan,
sesdek urboj; 31 kaj duono de Gilead, kaj Aŝtarot kaj
Edrei, urboj de la regno de Og en Baŝan, estis donitaj
al la idoj de Maĥir, filo de Manase, al duono de la idoj
de Maĥir laŭ iliaj familioj. 32 Tio estas, kion Moseo
disdividis sur la stepoj de Moab, transe de Jordan,

antaŭ JeriĤo, oriente. 33 Sed al la tribo de Levi Moseo
ne donis posedaĵon: la Eternulo, Dio de Izrael, estas
ilia hereda parto, kiel Li diris al ili.

**14** Kaj jen estas, kion la Izraelidoj ekposedis en la
lando Kanaana, kaj kion posedigis al ili la pastro
Eleazar, kaj Josuo, filo de Nun, kaj la familiestroj de
la triboj de Izrael. 2 Laŭ loto ili donis posedaĵon,
kiel ordonis la Eternulo per Moseo, al la naŭ triboj
kaj duono. 3 Ĉar Moseo donis al du triboj kaj duono
posedaĵon transe de Jordan; kaj al la Levidoj li ne
donis posedaĵon inter ili; 4 ĉar la idoj de Jozef estis
du triboj, Manase kaj Efraim; kaj al la Levidoj oni ne
donis parton en la lando, sed nur urbojn por loĝado,
kune kun iliaj antaŭurboj por iliaj brutoj kaj por ilia
havo. 5 Kiel la Eternulo ordonis al Moseo, tiel faris la
Izraelidoj kaj dividis la teron. 6 Kaj aliris la idoj de
Jehuda al Josuo en Gilgal, kaj diris al li Kaleb, filo de
Jefune, Kenizido: Vi scias tion, kion la Eternulo diris
al Moseo, la homo de Dio, pri mi kaj pri vi en Kadeŝ-
Barnea. 7 Mi havis la aĝon de kvardek jaroj, kiam
Moseo, servanto de la Eternulo, sendis min el Kadeŝ-
Barnea, por esplorrigardi la landon; kaj mi alportis
al li raporton laŭ mia konscienco. 8 Kaj miaj fratoj,
kiuj iris kun mi, malkuraĝigis la koron de la popolo;
sed mi obeis la Eternulon, mian Dion. 9 Kaj Moseo
ĵuris en tiu tago, dirante: La tero, sur kiu paŝis via
piedo, estos posedaĵo por vi kaj por viaj filoj eterne,
ĉar vi obeis la Eternulon, mian Dion. 10 Kaj nun jen la
Eternulo konservis min viva, kiel Li diris. Nun pasis
kvardek kvin jaroj de tiu tempo, kiam la Eternulo
diris tion al Moseo, dum Izrael iradis en la dezerto;
kaj nun jen mi havas la aĝon de okdek kvin jaroj. 11
Ankoraŭ hodiaŭ mi estas tiel forta, kiel en la tago,
kiam Moseo min sendis; kiom da forto mi tiam havis,
tiom mi nun havas por la milito, por eliri kaj eniri. 12
Donu do al mi nun ĉi tiun monton, pri kiu la Eternulo
parolis en tiu tago; ĉar vi aŭdis en tiu tago, ke tie estas
Anakidoj kaj grandaj kaj fortikigitaj urboj; eble la
Eternulo estos kun mi kaj mi forpelos ilin, kiel diris la
Eternulo. 13 Tiam Josuo benis lin, kaj donis Ĥebronon
al Kaleb, filo de Jefune, kiel posedaĵon. 14 Tial Ĥebron
fariĝis posedaĵo de Kaleb, filo de Jefune, la Kenizido,
ĝis la nuna tago; pro tio, ke li obeis la Eternulon, Dion
de Izrael. 15 Kaj la nomo de Ĥebron antaŭe estis urbo
de Arba, granda homo inter la Anakidoj. Kaj la tero
trankviliĝis de milito.

**15** La lotaĵo de la tribo de la Jehudaidoj laŭ iliaj
familioj estis: ĉe la limo de Edom la dezerto Cin,
sude, en la suda fino de la lando. 2 Ilia suda limo estis
de la fino de la Sala Maro, de la golfo, kiu direktiĝas
suden. 3 Kaj ĝi iras de sude al la altaĵo Akrabim kaj
pasas tra Cin kaj leviĝas de sude ĝis Kadeŝ-Barnea
kaj pasas tra Ĥecron kaj leviĝas ĝis Adar kaj turniĝas
al Karka 4 kaj pasas tra Acmon kaj iras al la torento
Egipta; kaj la fino de la limo estas la maro. Tio estu
por vi la limo suda. 5 Kaj la limo oriente estas la Sala
Maro ĝis la fino de Jordan; kaj la limo de la flanko
norda estas de la golfo de la maro ĉe la fino de Jordan;
6 kaj la limo leviĝas al Bet-Ĥogla kaj pasas norde al
Bet-Araba, kaj la limo leviĝas al la ŝtono de Bohan,
filo de Ruben. 7 Kaj la limo leviĝas al Debir de la valo
Aĥor, kaj norde ĝi turniĝas al Gilgal, kiu estas kontraŭ
la altaĵo Adumim, kiu estas sude de la torento; kaj la
limo pasas al la akvo En-Ŝemeŝ kaj finiĝas ĉe En-Rogel.
8 Kaj la limo leviĝas al la valo de la filo de Hinom, ĉe
la suda flanko de la Jebusidoj, kio estas Jerusalem,
kaj la limo leviĝas al la supro de la monto, kiu estas
okcidente kontraŭ la valo de Hinom, kiu estas ĉe la
fino de la valo Refaim norde. 9 Kaj de la supro de la
monto la limo turniĝas al la fonto de la akvo Neftoaĥ
kaj iras al la urboj de la monto Efron; kaj la limo
turniĝas al Baala, kiu estas Kirjat-Jearim. 10 Kaj la limo
turniĝas de Baala okcidenten al la monto Ŝeir, kaj iras
preter la norda flanko de la monto Jearim, kiu estas
Kesalon, kaj malleviĝas al Bet-Ŝemeŝ kaj iras al Timna;
11 kaj la limo iras preter la norda flanko de Ekron;
kaj la limo turniĝas al Ŝikron kaj pasas tra la monto
Baala kaj iras al Jabneel; kaj la fino de la limo estas ĉe
la maro. 12 La okcidenta limo estas la Granda Maro.
Ĉi tiu limo estas la limo de la Jehudaidoj ĉirkaŭe,
laŭ iliaj familioj. 13 Kaj al Kaleb, filo de Jefune, estis
donita parto meze de la Jehudaidoj, laŭ la diro de la
Eternulo al Josuo, la urbo de Arba, patro de Anak (tio
estas Ĥebron). 14 Kaj Kaleb elpelis el tie la tri filojn de
Anak: Ŝeŝaj kaj Aĥiman kaj Talmaj, la naskitojn de
Anak. 15 Kaj de tie li iris al la loĝantoj de Debir; la
nomo de Debir antaŭe estis Kirjat-Sefer. 16 Kaj Kaleb
diris: Kiu venkobatos Kirjat-Seferon kaj prenos ĝin,
al tiu mi donos mian filinon Aĥsa kiel edzinon. 17
Kaj prenis ĝin Otniel, filo de Kenaz, frato de Kaleb;
kaj li donis al li sian filinon Aĥsa kiel edzinon. 18 Kaj
kiam ŝi venis, ŝi instigis lin peti de ŝia patro kampon.
Kaj ŝi malsupreniĝis de la azeno, kaj Kaleb diris al

ŝi: Kio estas al vi? 19 Kaj ŝi diris: Donu al mi benon;
ĉar vi donis al mi teron sudflankan, tial donu al mi
ankaŭ akvofontojn. Kaj li donis al ŝi fontojn suprajn
kaj fontojn malsuprajn. 20 Jen estas la posedaĵo de
la tribo de la Jehudaidoj laŭ iliaj familioj. 21 Kaj la
urboj ĉe la rando de la tribo de la Jehudaidoj, apud la
limo de Edom sude, estis: Kabceel kaj Eder kaj Jagur
22 kaj Kina kaj Dimona kaj Adada 23 kaj Kedeŝ kaj
Ĥacor kaj Jitnan, 24 Zif kaj Telem kaj Bealot 25 kaj
Ĥacor-Ĥadata kaj Keriot-Ĥecron (tio estas Ĥacor),
26 Amam kaj Ŝema kaj Molada 27 kaj Ĥacar-Gada kaj
Ĥeŝmon kaj Bet-Pelet 28 kaj Ĥacar-Ŝual kaj Beer-Ŝeba
kaj Bizjotja, 29 Baala kaj Ijim kaj Ecem 30 kaj Eltolad
kaj Kesil kaj Ĥorma 31 kaj Ciklag kaj Madmana kaj
Sansana 32 kaj Lebaot kaj Ŝilĥim kaj Ain kaj Rimon. La
nombro de ĉiuj urboj estis dudek naŭ kaj iliaj vilaĝoj.
33 Sur la malaltaĵo: Eŝtaol kaj Corea kaj Aŝna 34 kaj
Zanoaĥ kaj En-Ganim, Tapuaĥ kaj Enam, 35 Jarmut kaj
Adulam, Soĥo kaj Azeka 36 kaj Ŝaaraim kaj Aditaim kaj
Gedera kaj Gederotaim: dek kvar urboj kaj iliaj vilaĝoj.
37 Cenan kaj Ĥadaŝa kaj Migdal-Gad 38 kaj Dilan kaj
Micpe kaj Jokteel, 39 Laĥiŝ kaj Bockat kaj Eglon 40
kaj Kabon kaj Laĥmas kaj Kitliŝ 41 kaj Gederot, Bet-
Dagon kaj Naama kaj Makeda: dek ses urboj kaj iliaj
vilaĝoj. 42 Libna kaj Eter kaj Aŝan 43 kaj Jiftaĥ kaj
Aŝna kaj Necib 44 kaj Keila kaj Aĥzib kaj Mareŝa: naŭ
urboj kaj iliaj vilaĝoj. 45 Ekron kaj ĝiaj urbetoj kaj
ĝiaj vilaĝoj. 46 De Ekron ĝis la maro ĉio, kio estas
ĉirkaŭ Aŝdod kaj ĝiaj vilaĝoj. 47 Aŝdod, ĝiaj urbetoj
kaj ĝiaj vilaĝoj; Gaza, ĝiaj urbetoj kaj ĝiaj vilaĝoj, ĝis
la torento Egipta; kaj la Granda Maro estas la limo.
48 Kaj sur la monto: Ŝamir kaj Jatir kaj Soĥo 49 kaj
Dana kaj Kirjat-Sana (tio estas Debir) 50 kaj Anab kaj
Eŝtemo kaj Anim 51 kaj Goŝen kaj Ĥolon kaj Gilo: dek
unu urboj kaj iliaj vilaĝoj. 52 Arab kaj Duma kaj Eŝan
53 kaj Janum kaj Bet-Tapuaĥ kaj Afeka 54 kaj Ĥumta
kaj Kirjat-Arba (tio estas Ĥebron) kaj Cior; naŭ urboj
kaj iliaj vilaĝoj. 55 Maon, Karmel kaj Zif kaj Juta 56
kaj Jizreel kaj Jokdeam kaj Zanoaĥ, 57 Kain, Gibea kaj
Timna: dek urboj kaj iliaj vilaĝoj. 58 Ĥalĥul, Bet-Cur
kaj Gedor 59 kaj Maarat kaj Bet-Anot kaj Eltekon: ses
urboj kaj iliaj vilaĝoj. 60 Kirjat-Baal (tio estas Kirjat-
Jearim) kaj Raba: du urboj kaj iliaj vilaĝoj. 61 En la
dezerto: Bet-Araba kaj Midin kaj Seĥaĥa 62 kaj Nibŝan
kaj la Urbo de Salo kaj En-Gedi: ses urboj kaj iliaj
vilaĝoj. 63 Sed la Jebusidojn, loĝantojn de Jerusalem,
la Jehudaidoj ne povis forpeli; kaj la Jebusidoj restis
kun la Jehudaidoj en Jerusalem ĝis la nuna tago.

16 Kaj la loto por la Jozefidoj donis: de Jordan
kontraŭ Jeriĥo, ĉe la akvo de Jeriĥo, orienten, la
dezerton, kiu etendiĝas de Jeriĥo ĝis la monto Bet-El.
2 Kaj la limo iras de Bet-El ĝis Luz, kaj transiras ĝis
la limo de la Arkanoj al Atarot; 3 kaj ĝi malleviĝas
okcidenten al la limo de la Jafletidoj, ĝis la limo de la
malsupra Bet-Ĥoron kaj ĝis Gezer; kaj ĝi finiĝas ĉe la
maro. 4 Tion ricevis kiel posedaĵon Manase kaj Efraim,
filoj de Jozef. 5 Kaj la regiono de la Efraimidoj estis laŭ
iliaj familioj: la limo de ilia posedaĵo oriente estis de
Atrot-Adar ĝis la supra Bet-Ĥoron. 6 Kaj la limo iras
al la maro ĉe Miĥmetat norde; kaj la limo turniĝas
orienten ĉe Taanat-Ŝilo, kaj trapasas ĝin orienten al
Janoaĥ. 7 Kaj ĝi malleviĝas de Janoaĥ al Atarot kaj
Naara, kaj tuŝas Jeriĥon, kaj finiĝas ĉe Jordan. 8 De
Tapuaĥ la limo iras okcidenten al la torento Kana, kaj
finiĝas ĉe la maro. Tio estas la posedaĵo de la tribo de
la Efraimidoj laŭ iliaj familioj; 9 kaj la urboj, kiuj estas
apartigitaj por la Efraimidoj meze de la posedaĵo de
la Manaseidoj, ĉiuj urboj kun iliaj vilaĝoj. 10 Kaj ili
ne forpelis la Kanaanidojn, kiuj loĝis en Gezer; kaj la
Kanaanidoj restis meze de la Efraimidoj ĝis la nuna
tago, servante kiel tributuloj.

17 Kaj la loto donis al la tribo de Manase, ĉar li estas
la unuenaskito de Jozef; al Maĥir, unuenaskito de
Manase kaj patro de Gilead, ĉar li estis homo militema,
estis donitaj Gilead kaj Baŝan. 2 Estis donite ankaŭ al
la ceteraj filoj de Manase laŭ iliaj familioj: al la filoj de
Abiezer kaj al la filoj de Ĥelek kaj al la filoj de Asriel
kaj al la filoj de Ŝeĥem kaj al la filoj de Ĥefer kaj al
la filoj de Ŝemida. Tio estas la naskitoj de Manase,
filo de Jozef, la virseksuloj, laŭ iliaj familioj. 3 Sed
Celofĥad, filo de Ĥefer, filo de Gilead, filo de Maĥir,
filo de Manase, ne havis filojn, sed nur filinojn; jen
estas la nomoj de liaj filinoj: Maĥla, kaj Noa, Ĥogla,
Milka, kaj Tirca. 4 Kaj ili aliris al la pastro Eleazar,
kaj al Josuo, filo de Nun, kaj al la estroj, dirante: La
Eternulo ordonis al Moseo doni al ni posedaĵon meze
de niaj fratoj. Kaj li donis al ili, konforme al la diro de
la Eternulo, posedaĵon inter la fratoj de ilia patro.
5 Kaj Manase ricevis dek parcelojn, krom la lando
Gileada kaj Baŝana, kiu estas transe de Jordan; 6 ĉar la
filinoj de Manase ricevis posedaĵon inter liaj filoj, kaj
la lando Gileada estis por la ceteraj filoj de Manase. 7

Kaj la limo de Manase estis de Aŝer ĝis Miĥmetat, kiu
estas kontraŭ Ŝeĥem; kaj la limo iras dekstren, al la
loĝantoj de En-Tapuaĥ. 8 Manase ricevis la landon
Tapuaĥ; sed la urbon Tapuaĥ ĉe la limo de Manase
ricevis la Efraimidoj. 9 Kaj la limo malsupreniras al la
torento Kana, sude de la torento. Tiuj urboj apartenas
al Efraim meze de la urboj de Manase. Kaj la limo
de Manase estas norde de la torento, kaj finiĝas ĉe
la maro. 10 La suda parto apartenis al Efraim, kaj la
norda parto apartenis al Manase, kaj la maro estis lia
limo. Kaj kun Aŝer ili kuntuŝiĝis norde, kaj kun Isaĥar
oriente. 11 Ĉe Isaĥar kaj Aŝer apartenis al Manase Bet-
Ŝean kaj ĝiaj urbetoj, kaj Jibleam kaj ĝiaj urbetoj, kaj la
loĝantoj de Dor kaj de ĝiaj urbetoj, kaj la loĝantoj de
En-Dor kaj de ĝiaj urbetoj, kaj la loĝantoj de Taanaĥ
kaj de ĝiaj urbetoj, kaj la loĝantoj de Megido kaj de
ĝiaj urbetoj, kaj la triobla altaĵo. 12 La filoj de Manase
ne povis preni tiujn urbojn; kaj la Kanaanidoj plue
restis en tiu lando. 13 Sed kiam la Izraelidoj plifortiĝis,
ili faris la Kanaanidojn tributuloj, sed ne forpelis ilin.
14 Kaj la filoj de Jozef ekparolis al Josuo, dirante: Kial
vi donis al mi kiel posedaĵon nur unu lotaĵon kaj
unu parcelon, dum mi estas ja multnombra, ĉar la
Eternulo min benis? 15 Kaj Josuo diris al ili: Se vi estas
multnombra, iru supren en la arbaron, kaj elhaku al vi
tie lokon en la lando de la Perizidoj kaj de la Rafaidoj;
ĉar la monto de Efraim estas malvasta por vi. 16 Kaj
la filoj de Jozef diris: Ne sufiĉos por ni la monto; kaj
ferajn ĉarojn havas ĉiuj Kanaanidoj, kiuj loĝas en la
valo, tiuj, kiuj loĝas en Bet-Ŝean kaj en ĝiaj urbetoj,
kaj ankaŭ tiuj, kiuj loĝas en la valo Jizreel. 17 Kaj Josuo
diris al la domo de Jozef, al Efraim kaj Manase, jene:
Vi estas multnombra kaj havas grandan forton, tial vi
ne havos unu lotaĵon, 18 sed vi havos monton, sur kiu
estas arbaro; elhaku ĝin, kaj ĝi estos via ĝis sia fino;
ĉar vi forpelos la Kanaanidojn, malgraŭ ke ili havas
ferajn ĉarojn, kaj malgraŭ ke ili estas fortaj.

**18** Kaj la tuta komunumo de la Izraelidoj kolektiĝis
en Ŝilo, kaj ili starigis tie la tabernaklon de
kunveno; kaj la lando estis jam submetita al ili. 2 Kaj
restis inter la Izraelidoj ankoraŭ sep triboj, al kiuj
ankoraŭ ne estis disdividita ilia hereda posedaĵo. 3
Kaj Josuo diris al la Izraelidoj: Ĝis kiam vi prokrastos
iri kaj ekposedi la landon, kiun donis al vi la Eternulo,
Dio de viaj patroj? 4 Elektu al vi po tri homoj el ĉiu
tribo, kaj mi sendos ilin, ke ili leviĝu kaj trairu la
landon kaj priskribu ĝin laŭ ĝiaj heredaj partoj kaj
venu al mi. 5 Kaj dividu ĝin en sep partojn. Jehuda
restu en siaj limoj sude, kaj la domo de Jozef restu
en siaj limoj norde. 6 Kaj vi disskribu la landon en
sep partojn, kaj alportu al mi ĉi tien; kaj mi faros
lotadon ĉi tie antaŭ la Eternulo, nia Dio. 7 La Levidoj
ne havos parton inter vi, ĉar la pastrado antaŭ la
Eternulo estas ilia hereda parto; kaj Gad kaj Ruben kaj
la duontribo de Manase prenis sian parton transe de
Jordan, oriente, kion donis al ili Moseo, servanto de
la Eternulo. 8 Kaj la viroj leviĝis kaj iris. Kaj Josuo
ordonis al tiuj, kiuj iris priskribi la landon, dirante:
Iru kaj trairu la landon kaj priskribu ĝin kaj revenu al
mi, kaj ĉi tie mi faros al vi lotadon antaŭ la Eternulo
en Ŝilo. 9 Kaj la viroj foriris kaj trairis la landon kaj
disskribis ĝin laŭ la urboj en sep partojn en libro, kaj
revenis al Josuo en la tendaron, al Ŝilo. 10 Kaj Josuo
faris al ili lotadon en Ŝilo antaŭ la Eternulo, kaj Josuo
dividis tie la landon por la Izraelidoj laŭ iliaj partoj.
11 Kaj eliris la loto de la tribo de la Benjamenidoj, laŭ
iliaj familioj; kaj la limoj de ilia lotita parto estis inter
la Jehudaidoj kaj la Jozefidoj. 12 Kaj ilia limo norde
estas de Jordan, kaj la limo leviĝas al la norda flanko
de Jeriĥo, kaj leviĝas sur la monton okcidente, kaj
finiĝas en la dezerto Bet-Aven. 13 Kaj de tie la limo
iras al Luz, al la suda flanko de Luz (tio estas Bet-El);
kaj la limo plue iras al Atrot-Adar, sur la monton,
kiu estas sude de la malsupra Bet-Ĥoron. 14 Kaj la
limo turniĝas kaj dekliniĝas okcidenten, suden de la
monto, kiu estas sude de Bet-Ĥoron; kaj ĝi finiĝas
ĉe Kirjat-Baal (tio estas Kirjat-Jearim), urbo de la
Jehudaidoj. Tio estas la flanko okcidenta. 15 Kaj la
suda flanko komenciĝas de la fino de Kirjat-Jearim;
kaj la limo iras okcidenten, kaj finiĝas ĉe la fonto de
la akvo Neftoaĥ. 16 Kaj la limo malleviĝas al la fino de
la monto, kiu estas antaŭ la valo de la filo de Hinom,
kiu troviĝas en la valo Refaim norde; kaj ĝi iras tra la
valo de Hinom al la sude flanko de la Jebusidoj, kaj
malleviĝas al En-Rogel. 17 Kaj ĝi turniĝas de norde,
kaj eliras al En-Ŝemeŝ, kaj iras al Gelilot, kiu estas
kontraŭ la altaĵo Adumim; kaj ĝi malleviĝas al la ŝtono
de Bohan, filo de Ruben. 18 Kaj ĝi iras preter la stepo
norden, kaj malleviĝas sur la stepon. 19 Kaj la limo
iras preter Bet-Ĥogla norden; kaj la limo finiĝas ĉe la
golfo de la Sala Maro norde, ĉe la suda fino de Jordan.
Tio estas la limo suda. 20 Kaj Jordan limas sur la flanko
orienta. Tio estas la posedaĵo de la Benjamenidoj laŭ

ĝiaj limoj ĉirkaŭe, laŭ iliaj familioj. 21 Kaj la urboj
de la tribo de la Benjamenidoj laŭ iliaj familioj estis:
Jeriĥo kaj Bet-Ĥogla kaj Emek-Kecic 22 kaj Bet-Araba
kaj Cemaraim kaj Bet-El 23 kaj Avim kaj Para kaj Ofra
24 kaj Kefer-Amona kaj Ofni kaj Geba: dek du urboj
kaj iliaj vilaĝoj. 25 Gibeon kaj Rama kaj Beerot 26 kaj
Micpe kaj Kefira kaj Moca 27 kaj Rekem kaj Jirpeel
kaj Tarala 28 kaj Cela, Elef, kaj la Jebusidoj (tio estas
Jerusalem), Gibeat, Kirjat: dek kvar urboj kaj iliaj
vilaĝoj. Tio estas la posedaĵo de la Benjamenidoj, laŭ
iliaj familioj.

19 Kaj la dua loto eliris por Simeon, por la tribo de
la Simeonidoj, laŭ iliaj familioj. Kaj ilia posedaĵo
estis meze de la posedaĵo de la Jehudaidoj. 2 Apartenis
al ili en ilia posedaĵo: Beer-Ŝeba (kun Ŝeba) kaj Molada
3 kaj Ĥacar-Ŝual kaj Bala kaj Ecem 4 kaj Eltolad kaj
Betul kaj Ĥorma 5 kaj Ciklag kaj Bet-Markabot kaj
Ĥacar-Susa 6 kaj Bet-Lebaot kaj Ŝaruĥen: dek tri
urboj kaj iliaj vilaĝoj. 7 Ain, Rimon kaj Eter kaj Aŝan:
kvar urboj kaj iliaj vilaĝoj. 8 Kaj ĉiuj vilaĝoj, kiuj
estas ĉirkaŭ tiuj urboj, ĝis Baalat-Beer, Ramat sude.
Tio estas la posedaĵo de la tribo de la Simeonidoj,
laŭ iliaj familioj. 9 El la landpeco de la Jehudaidoj
estis la posedaĵo de la Simeonidoj; ĉar la parto de la
Jehudaidoj estis tro granda por ili, tial la Simeonidoj
ricevis posedaĵon meze de ilia posedaĵo. 10 Kaj la
tria loto eliris por la Zebulunidoj, laŭ iliaj familioj;
kaj la limo de ilia posedaĵo estis ĝis Sarid. 11 Kaj ilia
limo iras ĝis la maro kaj Marala, kaj kuntuŝiĝas kun
Dabeŝet, kaj kuntuŝiĝas kun la torento, kiu estas antaŭ
Jokneam. 12 Kaj ĝi iras returne de Sarid orienten, al la
flanko de sunleviĝo, ĝis la limo de Kislot-Tabor; kaj ĝi
iras al Dabrat, kaj leviĝas al Jafia. 13 Kaj de tie ĝi iras
orienten, al la flanko de sunleviĝo, tra Gat-Ĥefer kaj
Et-Kacin, kaj eliras al Rimon-Metoar kaj Nea. 14 Kaj la
limo turniĝas de nordo al Ĥanaton, kaj finiĝas en la
valo Jiftaĥ-El. 15 Kaj Katat, kaj Nahalal kaj Ŝimron kaj
Jidala kaj Bet-Leĥem: dek du urboj kaj iliaj vilaĝoj.
16 Tio estas la posedaĵo de la Zebulunidoj, laŭ iliaj
familioj, tiuj urboj kaj iliaj vilaĝoj. 17 Por Isaĥar eliris
la kvara loto, por la Isaĥaridoj, laŭ iliaj familioj. 18
Kaj ilia limo estis: Jizreel kaj Kesulot kaj Ŝunem 19
kaj Ĥafaraim kaj Ŝion kaj Anaĥarat 20 kaj Rabit kaj
Kiŝjon kaj Abec 21 kaj Remet kaj En-Ganim kaj En-
Ĥada kaj Bet-Pacec. 22 Kaj la limo kuntuŝiĝas al Tabor
kaj Ŝaĥacima kaj Bet-Ŝemeŝ; kaj ilia limo finiĝas ĉe
Jordan: dek ses urboj kaj iliaj vilaĝoj. 23 Tio estas la
posedaĵo de la tribo de la Isaĥaridoj, laŭ iliaj familioj,
la urboj kaj iliaj vilaĝoj. 24 Kaj la kvina loto eliris
por la tribo de la Aŝeridoj, laŭ iliaj familioj. 25 Kaj
ilia limo estis: Ĥelkat kaj Ĥali kaj Beten kaj Aĥŝaf 26
kaj Alameleĥ kaj Amad kaj Miŝal. Kaj ĝi kuntuŝiĝas
al Karmel okcidente, kaj al Ŝiĥor-Libnat. 27 Kaj ĝi
returniĝas oriente al Bet-Dagon, kaj kuntuŝiĝas al
Zebulun kaj al la valo Jiftaĥ-El norde, al Bet-Emek kaj
Neiel, kaj eliras al Kabul maldekstre. 28 Kaj Ebron kaj
Reĥob kaj Ĥamon kaj Kana ĝis Granda Cidon. 29 Kaj
la limo returniĝas al Rama kaj al la fortikigita urbo
Tiro; kaj la limo returniĝas al Ĥosa, kaj finiĝas ĉe la
maro, de Ĥebel ĝis Aĥzib; 30 kaj Uma kaj Afek kaj
Reĥob: dudek du urboj kaj iliaj vilaĝoj. 31 Tio estas la
posedaĵo de la tribo de la Aŝeridoj, laŭ iliaj familioj,
tiuj urboj kaj iliaj vilaĝoj. 32 Por la Naftaliidoj eliris la
sesa loto, por la Naftaliidoj, laŭ iliaj familioj. 33 Kaj
ilia limo estis de Ĥelef, de la kverkaro ĉe Caananim,
Adami-Nekeb, kaj Jabneel, ĝis Lakum; kaj ĝi finiĝas ĉe
Jordan. 34 Kaj la limo turniĝas okcidenten al Aznot-
Tabor, kaj eliras de tie al Ĥukok, kaj kuntuŝiĝas al
Zebulun sude, kaj al Aŝer ĝi kuntuŝiĝas okcidente,
kaj al Jehuda ĉe Jordan oriente. 35 Kaj fortikigitaj
urboj: Cidim, Cer kaj Ĥamat, Rakat kaj Kineret 36 kaj
Adama kaj Rama kaj Ĥacor 37 kaj Kedeŝ kaj Edrei kaj
En-Ĥacor 38 kaj Jiron kaj Migdal-El, Ĥorem kaj Bet-
Anat kaj Bet-Ŝemeŝ: dek naŭ urboj kaj iliaj vilaĝoj.
39 Tio estas la posedaĵo de la tribo de la Naftaliidoj,
laŭ iliaj familioj, la urboj kaj iliaj vilaĝoj. 40 Por la
tribo de la Danidoj, laŭ iliaj familioj, eliris la sepa loto.
41 Kaj la limo de ilia posedaĵo estis: Corea kaj Eŝtaol
kaj Ir-Ŝemeŝ 42 kaj Ŝaalabin kaj Ajalon kaj Jitla 43 kaj
Elon kaj Timna kaj Ekron 44 kaj Elteke kaj Gibeton kaj
Baalat 45 kaj Jehud kaj Bene-Berak kaj Gat-Rimon 46
kaj Me-Jarkon kaj Rakon, kun la limo apud Jafo. 47 Kaj
tie finiĝas la limo de la Danidoj. Kaj la Danidoj iris
kaj militis kontraŭ Leŝem, kaj prenis ĝin kaj batis ĝin
per glavo, kaj ekposedis ĝin kaj enloĝiĝis en ĝi, kaj
donis al Leŝem la nomon Dan, laŭ la nomo de Dan,
ilia patro. 48 Tio estas la posedaĵo de la tribo de la
Danidoj, laŭ iliaj familioj, tiuj urboj kaj iliaj vilaĝoj. 49
Kaj ili finis la dividadon de la lando laŭ ĝiaj limoj;
kaj la Izraelidoj donis al Josuo, filo de Nun, heredan
posedaĵon inter si. 50 Laŭ la ordono de la Eternulo ili
donis al li la urbon, kiun li petis, Timnat-Seraĥ sur la
monto de Efraim; kaj li konstruis la urbon kaj loĝis en

ĝi. 51 Tio estas la posedaĵoj, kiujn la pastro Eleazar,
kaj Josuo, filo de Nun, kaj la familiestroj disdividis
al la triboj de la Izraelidoj laŭ loto, en Ŝilo, antaŭ la
Eternulo, antaŭ la pordo de la tabernaklo de kunveno.
Kaj ili finis la dividadon de la lando.

**20** Kaj la Eternulo ekparolis al Josuo, dirante: 2 Diru
al la Izraelidoj jene: Aranĝu al vi la urbojn de
rifuĝo, pri kiuj Mi parolis al vi per Moseo, 3 por ke
tien povu forkuri mortiginto, kiu mortigis homon per
eraro kaj ne sciante; kaj ili estu ĉe vi rifuĝejo kontraŭ
venĝanto pro sango. 4 Kaj li forkuros al unu el tiuj
urboj, kaj stariĝos antaŭ la pordego de la urbo, kaj
rakontos al la plejaĝuloj de tiu urbo sian aferon; kaj ili
enprenos lin en la urbon al si, kaj donos al li lokon,
por ke li loĝu ĉe ili. 5 Kaj kiam la sangovenĝanto
postkuros lin, ili ne transdonu la mortiginton en liajn
manojn; ĉar senintence li mortigis sian proksimulon,
kaj ne estis malamiko de li de antaŭe. 6 Kaj li loĝos
en tiu urbo, ĝis li stariĝos antaŭ la komunumo por
juĝo, ĝis la morto de la granda pastro, kiu estos en
tiu tempo. Tiam la mortiginto reiru, kaj venu en sian
urbon kaj al sia domo, en la urbon, el kiu li forkuris.
7 Kaj ili konsekris la urbon Kedeŝ en Galileo, sur la
monto de Naftali, kaj Ŝeĥem, sur la monto de Efraim,
kaj Kirjat-Arba (tio estas Ĥebron), sur la monto de
Jehuda. 8 Kaj transe de Jordan, oriente de Jeriĥo, ili
donis: Becer, en la dezerto, sur la ebenaĵo, de la tribo
de Ruben, kaj Ramot en Gilead, de la tribo de Gad,
kaj Golan en Baŝan, de la tribo de Manase. 9 Tiuj
urboj estis destinitaj por ĉiuj Izraelidoj, kaj por la
fremduloj, kiuj loĝas inter ili, por ke tien povu forkuri
ĉiu, kiu mortigis homon per eraro, kaj por ke li ne
mortu de la mano de sangovenĝanto, ĝis li stariĝos
antaŭ la komunumo.

**21** Kaj la familiestroj de la Levidoj aliris al la
pastro Eleazar, kaj al Josuo, filo de Nun, kaj al la
familiestroj de la triboj de la Izraelidoj, 2 kaj ekparolis
al ili en Ŝilo, en la lando Kanaana, dirante: La Eternulo
ordonis per Moseo doni al ni urbojn por loĝi, kaj iliajn
ĉirkaŭaĵojn por niaj brutoj. 3 Tiam la Izraelidoj donis
al la Levidoj el siaj posedaĵoj, konforme al la ordono
de la Eternulo, tiujn urbojn kaj iliajn ĉirkaŭaĵojn. 4
Kaj eliris la loto por la familio de la Kehatidoj; kaj al
la filoj de la pastro Aaron, el la Levidoj, estis donitaj
de la tribo de Jehuda kaj de la tribo de la Simeonidoj
kaj de la tribo de Benjamen, per loto, dek tri urboj.
5 Kaj al la ceteraj filoj de Kehat estis donitaj de la
familioj de la tribo de Efraim kaj de la tribo de Dan
kaj de la duontribo de Manase, per loto, dek urboj. 6
Kaj al la filoj de Gerŝon estis donitaj de la familioj
de la tribo de Isaĥar kaj de la tribo de Aŝer kaj de
la tribo de Naftali kaj de la duontribo de Manase en
Baŝan, per loto, dek tri urboj. 7 Al la filoj de Merari,
laŭ iliaj familioj, estis donitaj de la tribo de Ruben
kaj de la tribo de Gad kaj de la tribo de Zebulun dek
du urboj. 8 Kaj la Izraelidoj donis al la Levidoj per
loto tiujn urbojn kaj iliajn ĉirkaŭaĵojn, kiel ordonis
la Eternulo per Moseo. 9 Kaj ili donis de la tribo de
la Jehudaidoj kaj de la tribo de la Simeonidoj tiujn
urbojn, kies nomojn ili difinis. 10 Al la filoj de Aaron
el la familioj de la Kehatidoj, el la Levidoj — ĉar ilia
estis la loto unua — 11 al ili oni donis la urbon de
Arba, patro de Anak (tio estas, la urbon Ĥebron), sur
la monto de Jehuda, kaj ĝiajn suburbaĵojn ĉirkaŭ ĝi. 12
Kaj la kampon de la urbo kaj ĝiajn vilaĝojn oni donis
al Kaleb, filo de Jefune, kiel propraĵon. 13 Kaj al la filoj
de la pastro Aaron oni donis la urbon de rifuĝo por
mortiginto Ĥebron kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, kaj Libna kaj
ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, 14 kaj Jatir kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, kaj
Eŝtemoa kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, 15 kaj Ĥolon kaj ĝiajn
ĉirkaŭaĵojn, kaj Debir kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, 16 kaj Ain
kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, kaj Juta kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn,
Bet-Ŝemeŝ kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn: naŭ urbojn de tiuj
du triboj. 17 Kaj de la tribo de Benjamen: Gibeon
kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, Geba kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, 18
Anatot kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, kaj Almon kaj ĝiajn
ĉirkaŭaĵojn: kvar urbojn. 19 La nombro de ĉiuj urboj
de la Aaronidoj, la pastroj, estis dek tri urboj kaj
iliaj ĉirkaŭaĵoj. 20 Kaj por la familioj de la Kehatidoj,
la Levidoj, la restintaj el la Kehatidoj, la urboj de
ilia loto estis de la tribo de Efraim. 21 Kaj oni donis
al ili la rifuĝurbon por mortiginto Ŝeĥem kaj ĝiajn
ĉirkaŭaĵojn, sur la monto de Efraim, kaj Gezer kaj ĝiajn
ĉirkaŭaĵojn, 22 kaj Kibcaim kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, kaj
Bet-Ĥoron kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn: kvar urbojn. 23 Kaj de
la tribo de Dan: Elteke kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, Gibeton
kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, 24 Ajalon kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn,
Gat-Rimon kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn: kvar urbojn. 25 Kaj de
la duontribo de Manase: Taanaĥ kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn,
kaj Gat-Rimon kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn: du urbojn. 26
La nombro de ĉiuj urboj kun iliaj ĉirkaŭaĵoj por la
familioj de la restintaj Kehatidoj estis dek. 27 Kaj al la
Gerŝonidoj, el la familioj de la Levidoj, oni donis de la

duontribo de Manase la rifuĝurbon por mortiginto
Golan en Baŝan kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, kaj Beeŝtera
kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn: du urbojn. **28** Kaj de la tribo
de Isaĥar: Kiŝjon kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, Dabrat kaj
ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, **29** Jarmut kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, En-
Ganim kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn: kvar urbojn. **30** Kaj de la
tribo de Aŝer: Miŝal kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, Abdon kaj
ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, **31** Ĥelkat kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, kaj
Reĥob kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn: kvar urbojn. **32** Kaj de la
tribo de Naftali: la rifuĝurbon por mortiginto Kedeŝ
en Galileo kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, kaj Ĥamot-Dor kaj
ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, kaj Kartan kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn: tri
urbojn. **33** La nombro de ĉiuj urboj de la Gerŝonidoj,
laŭ iliaj familioj, estis dek tri urboj kaj iliaj ĉirkaŭaĵoj.
**34** Kaj al la familioj de la Merariidoj, la ceteraj Levidoj,
oni donis de la tribo de Zebulun: Jokneam kaj ĝiajn
ĉirkaŭaĵojn, Karta kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, **35** Dimna kaj
ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, Nahalal kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn: kvar
urbojn. **36** Kaj de la tribo de Ruben: Becer kaj ĝiajn
ĉirkaŭaĵojn, kaj Jahac kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, **37** Kedemot
kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, kaj Mefaat kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn:
kvar urbojn. **38** Kaj de la tribo de Gad: la rifuĝurbon
por mortiginto Ramot en Gilead kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn,
kaj Maĥanaim kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, **39** Ĥeŝbon kaj
ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, Jazer kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn: kune
kvar urbojn. **40** La nombro de ĉiuj urboj, kiujn lote
ricevis la Merariidoj, laŭ iliaj familioj, la restintaj el la
familioj de la Levidoj, estis dek du. **41** La nombro de
ĉiuj urboj de la Levidoj meze de la posedaĵoj de la
Izraelidoj estis kvardek ok urboj kaj iliaj ĉirkaŭaĵoj.
**42** Tiuj urboj estis ĉiu urbo kun ĝiaj ĉirkaŭaĵoj; tiel
estis kun ĉiuj tiuj urboj. **43** Kaj la Eternulo donis al la
Izraelidoj la tutan landon, kiun doni Li ĵuris al iliaj
patroj; kaj ili ekposedis ĝin kaj enloĝiĝis en ĝi. **44** Kaj
la Eternulo donis al ili trankvilecon ĉirkaŭe, konforme
al ĉio, kion Li ĵuris al iliaj patroj; kaj neniu homo
el ĉiuj iliaj malamikoj rezistis antaŭ ili; ĉiujn iliajn
malamikojn la Eternulo transdonis en iliajn manojn.
**45** Ne mankis eĉ unu vorto el ĉiuj bonaj vortoj, kiujn la
Eternulo diris al la domo de Izrael; ĉio plenumiĝis.

**22** Tiam Josuo alvokis la Rubenidojn kaj la Gadidojn
kaj la duontribon de Manase; **2** kaj li diris al ili:
Vi plenumis ĉion, kion ordonis al vi Moseo, servanto
de la Eternulo, kaj vi obeis mian voĉon en ĉio, kion mi
ordonis al vi. **3** Vi ne forlasis viajn fratojn dum longa
tempo ĝis nun, kaj vi plenumis la deciditaĵon laŭ la
ordono de la Eternulo, via Dio. **4** Nun la Eternulo, via
Dio, donis ripozon al viaj fratoj, kiel Li diris al ili;
turnu do vin nun, kaj iru al viaj tendoj sur la teron
de via posedaĵo, kiun donis al vi Moseo, servanto
de la Eternulo, transe de Jordan. **5** Sed forte penu
plenumi la ordonojn kaj la instruon, kiujn donis al vi
Moseo, servanto de la Eternulo, por ami la Eternulon,
vian Dion, kaj iri laŭ ĉiuj Liaj vojoj kaj observi Liajn
ordonojn kaj alfortikiĝi al Li kaj servi al Li per via tuta
koro kaj per via tuta animo. **6** Kaj Josuo benis ilin kaj
forliberigis ilin; kaj ili iris al siaj tendoj. **7** Kaj al unu
duono de la tribo de Manase Moseo donis posedaĵon
en Baŝan, kaj al la dua duono Josuo donis posedaĵon
kun iliaj fratoj transe de Jordan, okcidente. Kaj kiam
Josuo forliberigis ilin al iliaj tendoj, li benis ilin. **8** Kaj li
diris al ili jene: Kun granda riĉaĵo vi reiras nun al viaj
tendoj, kaj kun tre granda brutaro, kun arĝento kaj
kun oro kaj kun kupro kaj kun fero, kaj kun tre multe
da vestoj; dividu la militakiron, kiun vi ricevis de viaj
malamikoj, kun viaj fratoj. **9** Kaj turniĝis la Rubenidoj
kaj la Gadidoj kaj la duontribo de Manase, kaj foriris de
la Izraelidoj el Ŝilo, kiu estas en la lando Kanaana, por
iri en la landon Gilead, en la landon de ilia posedaĵo,
kiun ili ekposedis laŭ la ordono de la Eternulo per
Moseo. **10** Kaj ili venis en la distriktojn ĉe Jordan,
kiuj estas en la lando Kanaana; kaj la Rubenidoj kaj
la Gadidoj kaj la duontribo de Manase konstruis tie
altaron ĉe Jordan, altaron grandan kaj bonaspektan. **11**
Kaj aŭdis la Izraelidoj: Jen la Rubenidoj kaj la Gadidoj
kaj la duontribo de Manase konstruis altaron apud la
lando Kanaana, en la distriktoj de Jordan, sur la flanko
de la Izraelidoj. **12** Kaj kiam la Izraelidoj tion aŭdis,
tiam la tuta komunumo de la Izraelidoj kolektiĝis en
Ŝilo, por iri kontraŭ ilin milite. **13** Kaj la Izraelidoj
sendis al la Rubenidoj kaj la Gadidoj kaj la duontribo
de Manase en la landon Gilead Pineĥason, filon de la
pastro Eleazar, **14** kaj kun li dek ĉefojn, po unu ĉefo el
tribo, el ĉiuj triboj de Izrael; kaj ĉiu el ili estis estro de
patrodomo inter la miloj de Izrael. **15** Kaj ili venis al la
Rubenidoj kaj la Gadidoj kaj la duontribo de Manase
en la landon Gilead, kaj ekparolis al ili, dirante: **16**
Tiel diras la tuta komunumo de la Eternulo: Kio estas
ĉi tiu krimo, kiun vi faris kontraŭ la Dio de Izrael,
forturniĝinte hodiaŭ de la Eternulo, konstruinte al
vi altaron kaj ribelante hodiaŭ kontraŭ la Eternulo?
**17** Ĉu ne sufiĉas al ni la krimo pri Peor, de kiu ni
ne puriĝis ĝis la nuna tago kaj pro kiu trafis frapo

la komunumon de Izrael? 18 Kaj vi forturniĝas nun
de la Eternulo! estos tiel: hodiaŭ vi ribelas kontraŭ
la Eternulo, kaj morgaŭ Li koleros kontraŭ la tuta
komunumo de Izrael. 19 Se la lando de via posedaĵo
ŝajnas al vi malpura, tiam transiru en la landon de
la posedaĵo de la Eternulo, en kiu staras la loĝejo
de la Eternulo, kaj prenu posedaĵon inter ni; sed
kontraŭ la Eternulo ne ribelu, kaj kontraŭ ni ne
ribelu, konstruante al vi altaron krom la altaro de la
Eternulo, nia Dio. 20 Jen, Aĥan, filo de Zeraĥ, faris
krimon koncerne la anatemitaĵon, kaj la kolero estis
kontraŭ la tuta komunumo de Izrael, kaj ne li sola
mortis pro sia krimo. 21 Kaj respondis la Rubenidoj
kaj la Gadidoj kaj la duontribo de Manase, kaj diris al
la milestroj de Izrael: 22 Dio de la dioj, la Eternulo,
Dio de la dioj, la Eternulo, Li scias, kaj Izrael sciu;
se ni agis pro ribelo aŭ por defali de la Eternulo,
tiam Li ne helpu nin hodiaŭ. 23 Se ni konstruis al
ni la altaron por tio, ke ni defalu de la Eternulo, aŭ
ke ni alportu sur ĝi bruloferon kaj farunoferon, aŭ
ke ni faru sur ĝi pacoferojn, tiam la Eternulo nin
punu. 24 Ni faris tion pro zorgo pri tio, ke morgaŭ
ne diru viaj filoj al niaj filoj: Kion komunan vi havas
kun la Eternulo, Dio de Izrael? 25 kiel limon inter
ni kaj vi, Rubenidoj kaj Gadidoj, la Eternulo metis
Jordanon; vi ne havas parton en la Eternulo. Kaj
tiamaniere viaj filoj malhelpus niajn filojn respekti la
Eternulon. 26 Tial ni diris: Ni konstruu al ni altaron,
ne por brulofero nek por aliaj oferoj, 27 sed nur por
ke ĝi estu atesto inter ni kaj vi kaj inter niaj estontaj
generacioj, ke ni havas la rajton fari servon al la
Eternulo antaŭ Li per niaj bruloferoj kaj per niaj
buĉoferoj kaj per niaj pacoferoj, kaj por ke ne diru
viaj filoj morgaŭ al niaj filoj: Vi ne havas parton en
la Eternulo. 28 Kaj ni pensis: Se ili diros tion al ni
kaj al niaj estontaj generacioj, tiam ni diros: Vidu
la similaĵon de la altaro de la Eternulo, kiun faris
niaj patroj, ne por brulofero nek por buĉofero, sed
nur kiel ateston inter ni kaj vi. 29 Malproksima de ni
estas la deziro ribeli kontraŭ la Eternulo kaj defali
hodiaŭ de la Eternulo, konstrui altaron por brulofero,
por farunofero kaj por buĉofero, krom la altaro de la
Eternulo, nia Dio, kiu estas antaŭ Lia tabernaklo. 30
Kaj la pastro Pineĥas, kaj la ĉefoj de la komunumo,
kaj la milestroj de Izrael, kiuj estis kun li, aŭdis la
vortojn, kiujn diris la Rubenidoj kaj la Gadidoj kaj
la Manaseidoj, kaj tio plaĉis al ili. 31 Kaj la pastro
Pineĥas, filo de Eleazar, diris al la Rubenidoj kaj la
Gadidoj kaj la Manaseidoj: Nun ni scias, ke la Eternulo
estas inter ni, ĉar vi ne faris kontraŭ la Eternulo tiun
krimon; vi savis la Izraelidojn kontraŭ la mano de
la Eternulo. 32 Kaj la pastro Pineĥas, filo de Eleazar,
kaj la ĉefoj reiris de la Rubenidoj kaj la Gadidoj el la
lando Gilead en la landon Kanaanan, al la Izraelidoj,
kaj alportis al ili respondon. 33 Kaj tio plaĉis al la
Izraelidoj; kaj la Izraelidoj benis Dion, kaj ne havis
plu la intencon iri kontraŭ ilin milite, por ruinigi la
landon, en kiu loĝis la Rubenidoj kaj la Gadidoj. 34 Kaj
la Rubenidoj kaj la Gadidoj donis nomon al la altaro:
ke ĝi estu atesto inter ni, ke la Eternulo estas la Dio.

**23** Longan tempon post kiam la Eternulo donis
al Izrael ripozon kontraŭ ĉiuj iliaj malamikoj
ĉirkaŭe, Josuo maljuniĝis, atingis profundan aĝon. 2
Tiam Josuo alvokis la tutan Izrael, iliajn plejaĝulojn
kaj ĉefojn kaj juĝistojn kaj observistojn, kaj diris al
ili: Mi maljuniĝis, mi atingis profundan aĝon. 3 Kaj
vi vidis ĉion, kion faris la Eternulo, via Dio, al ĉiuj
tiuj popoloj antaŭ vi; ĉar la Eternulo, via Dio, mem
batalis por vi. 4 Vidu, mi dividis por vi lote tiujn
restintajn popolojn, kiel posedaĵon por viaj triboj,
komencante de Jordan, kaj ĉiujn popolojn, kiujn mi
ekstermis, ĝis la Granda Maro, kie subiras la suno.
5 Kaj la Eternulo, via Dio, forpuŝos ilin de antaŭ vi
kaj forpelos ilin de antaŭ vi; kaj vi ekposedos ilian
landon, kiel diris al vi la Eternulo, via Dio. 6 Penu do
bone, ke vi observu kaj plenumu ĉion, skribitan en
la libro de instruo de Moseo, ne forkliniĝante de ĝi
dekstren nek maldekstren, 7 ne komunikiĝante kun
tiuj popoloj, kiuj restis kun vi; kaj la nomon de iliaj
dioj ne citu, kaj ne ĵuru per ili, kaj ne servu al ili, kaj
ne adoru ilin; 8 nur al la Eternulo, via Dio, alfortikiĝu,
kiel vi faris ĝis la nuna tago. 9 Kaj la Eternulo forpelis
de antaŭ vi popolojn grandajn kaj fortajn; kaj neniu
rezistis antaŭ vi ĝis la nuna tago. 10 Unu el vi forpelas
milon; ĉar la Eternulo, via Dio, mem batalas por vi,
kiel Li diris al vi. 11 Gardu do bone viajn animojn, por
ami la Eternulon, vian Dion. 12 Ĉar se vi forkliniĝos,
kaj aliĝos al tiuj restintaj popoloj, kiuj restis kun vi,
kaj vi boparenciĝos kun ili, kaj vi iros al ili kaj ili
al vi: 13 tiam sciu, ke la Eternulo, via Dio, ne plu
forpelos tiujn popolojn de antaŭ vi; kaj ili fariĝos
por vi kaptilo kaj reto, kaj vipo por viaj flankoj, kaj
pikilo por viaj okuloj, ĝis vi forpereos de sur tiu bona

tero, kiun donis al vi la Eternulo, via Dio. 14 Nun mi
ekiras hodiaŭ la vojon de la tuta mondo; kaj vi sciu
per via tuta koro kaj per via tuta animo, ke ne restis
neplenumita eĉ unu vorto el ĉiuj bonaj vortoj, kiujn la
Eternulo, via Dio, diris pri vi; ĉio plenumiĝis por vi, ne
mankis el ĝi eĉ unu vorto. 15 Sed kiel plenumiĝis por
vi ĉiuj bonaj vortoj, kiujn la Eternulo, via Dio, diris al
vi, tiel la Eternulo venigos sur vin ĉion malbonan, ĝis
Li ekstermos vin de sur tiu bona tero, kiun donis al vi
la Eternulo, via Dio. 16 Se vi malobeos la interligon de
la Eternulo, via Dio, kiun Li starigis kun vi, kaj vi iros
kaj servos al aliaj dioj kaj adoros ilin: tiam ekflamos
kontraŭ vin la kolero de la Eternulo, kaj vi forpereos
rapide de sur la bona tero, kiun Li donis al vi.

24 Kaj Josuo kunvenigis ĉiujn tribojn de Izrael en
Ŝeĥemon, kaj alvokis la plejaĝulojn de Izrael
kaj iliajn ĉefojn kaj juĝistojn kaj observistojn; kaj ili
stariĝis antaŭ Dio. 2 Kaj Josuo diris al la tuta popolo:
Tiel diris la Eternulo, Dio de Izrael: Transe de la Rivero
loĝis viaj patroj en la tempo antikva, Teraĥ, patro
de Abraham kaj patro de Naĥor; kaj ili servis al aliaj
dioj. 3 Sed Mi prenis vian patron Abraham de trans la
Rivero kaj kondukis lin tra la tuta lando Kanaana, kaj
Mi multigis lian idaron, kaj Mi donis al li Isaakon. 4
Kaj Mi donis al Isaak Jakobon kaj Esavon; kaj Mi donis
al Esav la monton Seir, ke li posedu ĝin; sed Jakob kaj
liaj filoj foriris en Egiptujon. 5 Kaj Mi sendis Moseon
kaj Aaronon, kaj frapis Egiptujon, kiel Mi faris inter
ili; kaj poste Mi elkondukis vin. 6 Kaj Mi elkondukis
viajn patrojn el Egiptujo; kaj vi venis al la maro. Kaj la
Egiptoj postkuris viajn patrojn per ĉaroj kaj rajdantoj
ĝis la Ruĝa Maro. 7 Kaj ili ekkriis al la Eternulo, kaj Li
aperigis mallumon inter vi kaj la Egiptoj, kaj venigis
sur ilin la maron kaj kovris ilin. Kaj viaj okuloj vidis,
kion Mi faris en Egiptujo; kaj vi loĝis en la dezerto
dum longa tempo. 8 Kaj Mi venigis vin al la lando de
la Amoridoj, kiuj loĝas transe de Jordan, kaj ili militis
kontraŭ vi; kaj Mi transdonis ilin en viajn manojn,
kaj vi ekposedis ilian landon, kaj Mi ekstermis ilin
antaŭ vi. 9 Kaj leviĝis Balak, filo de Cipor, reĝo de
Moab, kaj militis kontraŭ Izrael, kaj sendis kaj alvokis
Bileamon, filon de Beor, por malbeni vin. 10 Sed Mi ne
volis aŭskulti Bileamon; kaj li benis vin, kaj Mi savis
vin el liaj manoj. 11 Kaj vi transiris Jordanon kaj venis
al Jeriĥo; kaj militis kontraŭ vi la loĝantoj de Jeriĥo,
la Amoridoj kaj la Perizidoj kaj la Kanaanidoj kaj la
Ĥetidoj kaj la Girgaŝidoj, la Ĥividoj kaj la Jebusidoj;
sed Mi transdonis ilin en viajn manojn. 12 Kaj Mi
sendis antaŭ vi krabrojn, kaj ili forpelis de vi la du
reĝojn de la Amoridoj; ne per via glavo, kaj ne per
via pafarko. 13 Kaj Mi donis al vi landon, pri kiu vi
ne laboris, kaj urbojn, kiujn vi ne konstruis, kaj vi
loĝas en ili; de vinberĝardenoj kaj olivarboj, kiujn
vi ne plantis, vi manĝas. 14 Timu do la Eternulon,
kaj servu al Li fidele kaj vere; kaj forpuŝu la diojn,
al kiuj servis viaj patroj transe de la Rivero kaj en
Egiptujo, kaj servu al la Eternulo. 15 Sed se ne plaĉas
al vi servi al la Eternulo, tiam elektu al vi hodiaŭ,
al kiu vi volas servi: ĉu al la dioj, al kiuj servis viaj
patroj, kiuj loĝis transe de la Rivero, ĉu al la dioj de la
Amoridoj, en kies lando vi loĝas; sed mi kaj mia domo
servos al la Eternulo. 16 Tiam la popolo respondis
kaj diris: Malproksima de ni estas la deziro forlasi
la Eternulon kaj servi al aliaj dioj; 17 ĉar la Eternulo
estas nia Dio, Li, kiu elkondukis nin kaj niajn patrojn
el Egiptujo, el la domo de sklaveco, kaj kiu faris antaŭ
niaj okuloj tiujn grandajn signojn, kaj gardis nin dum
la tuta vojo, kiun ni iris, kaj inter ĉiuj popoloj, tra
kies mezo ni trairis. 18 Kaj la Eternulo forpelis antaŭ
ni ĉiujn popolojn, kaj la Amoridojn, kiuj loĝis en la
lando. Ni do ankaŭ servos al la Eternulo; ĉar Li estas
nia Dio. 19 Kaj Josuo diris al la popolo: Vi ne povas
servi al la Eternulo; ĉar Li estas Dio sankta, Dio severa;
Li ne estos indulga kontraŭ viaj malbonagoj kaj pekoj.
20 Se vi forlasos la Eternulon kaj servos al fremdaj
dioj, tiam Li Sin turnos kaj faros al vi malbonon kaj
ekstermos vin, post kiam Li faris al vi bonon. 21 Kaj la
popolo diris al Josuo: Ne, nur al la Eternulo ni servos.
22 Kaj Josuo diris al la popolo: Vi estas atestantoj pri
vi, ke vi elektis al vi la Eternulon, por servi al Li. Kaj
ili respondis: Ni estas atestantoj. 23 Nun forpuŝu do
la fremdajn diojn, kiuj estas inter vi, kaj turnu vian
koron al la Eternulo, Dio de Izrael. 24 Kaj la popolo
diris al Josuo: Al la Eternulo, nia Dio, ni servos, kaj
Lian voĉon ni obeos. 25 Kaj Josuo faris interligon
kun la popolo en tiu tago, kaj donis al ĝi leĝojn kaj
regulojn en Ŝeĥem. 26 Kaj Josuo skribis tiujn vortojn
en la libron de instruo de Dio, kaj li prenis grandan
ŝtonon, kaj starigis ĝin tie sub la kverko, kiu estis
apud la sanktejo de la Eternulo. 27 Kaj Josuo diris al la
tuta popolo: Jen ĉi tiu ŝtono estos por ni atestanto;
ĉar ĝi aŭdis ĉiujn vortojn de la Eternulo, kiujn Li diris
al ni; kaj ĝi estu atestanto pri vi, por ke vi ne forneu

vian Dion. 28 Kaj Josuo forliberigis la popolon, ĉiun
al lia posedaĵo. 29 Post tiu okazintaĵo mortis Josuo,
filo de Nun, servanto de la Eternulo, havante la aĝon
de cent dek jaroj. 30 Kaj oni enterigis lin inter la
limoj de lia posedaĵo en Timnat-Seraĥ, kiu estas sur
la monto de Efraim, norde de la monto Gaaŝ. 31 Kaj
Izrael servis al la Eternulo dum la tuta vivo de Josuo,
kaj dum la tuta vivo de la plejaĝuloj, kiuj vivis longe
post Josuo, kaj kiuj sciis ĉiujn farojn de la Eternulo,
kiujn Li faris al Izrael. 32 Kaj la ostojn de Jozef, kiujn
la Izraelidoj kunportis el Egiptujo, oni enterigis en
Ŝeĥem, sur la kampoparto, kiun Jakob aĉetis de la filoj
de Ĥamor, patro de Ŝeĥem, pro cent kesitoj, kaj kiu
fariĝis posedaĵo de la filoj de Jozef. 33 Kaj Eleazar, filo
de Aaron, mortis; kaj oni enterigis lin sur la monteto
de Pineĥas, lia filo, la monteto, kiu estis donita al li
sur la monto de Efraim.

# Juĝistoj

**1** Post la morto de Josuo la Izraelidoj demandis la
Eternulon, dirante: Kiu el ni plej antaŭe devas
iri kontraŭ la Kanaanidojn, por militi kontraŭ ili? **2**
Kaj la Eternulo diris: Jehuda iros; jen Mi transdonas
la landon en liajn manojn. **3** Tiam Jehuda diris al
sia frato Simeon: Iru kun mi en mian sorton, kaj ni
militos kontraŭ la Kanaanidoj; kaj mi ankaŭ iros kun
vi en vian sorton. Kaj Simeon iris kun li. **4** Kaj Jehuda
iris, kaj la Eternulo transdonis en liajn manojn la
Kanaanidojn kaj la Perizidojn; kaj ili batis el ili en
Bezek dek mil homojn. **5** Kaj ili renkontis Adoni-
Bezekon en Bezek kaj batalis kontraŭ li kaj venkobatis
la Kanaanidojn kaj la Perizidojn. **6** Kaj Adoni-Bezek
forkuris; sed ili postkuris lin kaj kaptis lin kaj dehakis
la dikfingrojn de liaj manoj kaj piedoj. **7** Kaj Adoni-
Bezek diris: Sepdek reĝoj kun dehakitaj dikfingroj de
la manoj kaj piedoj kolektadis panrestaĵojn sub mia
tablo; kiel mi agis, tiel Dio repagis al mi. Kaj oni venigis
lin en Jerusalemon, kaj li mortis tie. **8** Kaj la Jehudaidoj
militis kontraŭ Jerusalem kaj prenis ĝin kaj venkobatis
ĝin per glavo, kaj la urbon ili forbruligis. **9** Poste la
Jehudaidoj iris, por militi kontraŭ la Kanaanidoj, kiuj
loĝis sur la monto kaj en la suda regiono kaj sur la
malaltaĵo. **10** Kaj Jehuda iris al la Kanaanidoj, kiuj
loĝis en Ĥebron (la nomo de Ĥebron antaŭe estis
Kirjat-Arba), kaj venkobatis Ŝeŝajon kaj Aĥimanon kaj
Talmajon. **11** Kaj de tie li iris al la loĝantoj de Debir (la
nomo de Debir antaŭe estis Kirjat-Sefer). **12** Kaj Kaleb
diris: Kiu venkobatos Kirjat-Seferon kaj prenos ĝin, al
tiu mi donos mian filinon Aĥsa kiel edzinon. **13** Kaj
prenis ĝin Otniel, filo de Kenaz, la pli juna frato de
Kaleb; kaj li donis al li sian filinon Aĥsa kiel edzinon.
**14** Kaj kiam ŝi venis, ŝi instigis lin peti de ŝia patro
kampon. Kaj ŝi malsupreniĝis de la azeno; kaj Kaleb
diris al ŝi: Kio estas al vi? **15** Kaj ŝi diris al li: Donu al
mi benon; ĉar vi donis al mi teron sudflankan, tial
donu al mi ankaŭ akvofontojn. Kaj Kaleb donis al
ŝi fontojn suprajn kaj fontojn malsuprajn. **16** Kaj la
idoj de la Kenido, bofrato de Moseo, iris el la urbo de
Palmoj kun la idoj de Jehuda en la dezerton de Jehuda,
kiu estas sude de Arad; kaj ili venis kaj ekloĝis kune
kun la popolo. **17** Kaj Jehuda iris kun sia frato Simeon,
kaj ili venkobatis la Kanaanidojn, kiuj loĝis en Cefat,
kaj detruis ĝin, kaj donis al la urbo la nomon Ĥorma.
**18** Kaj Jehuda prenis la urbojn Gaza kun ĝiaj limoj
kaj Aŝkelon kun ĝiaj limoj kaj Ekron kun ĝiaj limoj.
**19** Kaj la Eternulo estis kun Jehuda, kaj li ekposedis
la monton. Sed li ne povis forpeli la loĝantojn de la
valo, ĉar ili havis ferajn ĉarojn. **20** Kaj oni donis al
Kaleb Ĥebronon, kiel diris Moseo; kaj li elpelis el tie
la tri filojn de Anak. **21** Sed la Jebusidojn, kiuj loĝis en
Jerusalem, la Benjamenidoj ne elpelis; kaj la Jebusidoj
loĝis kun la Benjamenidoj en Jerusalem ĝis la nuna
tago. **22** Kaj iris ankaŭ la Jozefidoj al Bet-El; kaj la
Eternulo estis kun ili. **23** Kaj la Jozefidoj esplorrigardis
Bet-Elon (la nomo de la urbo antaŭe estis Luz). **24** Kaj
la esplorrigardantoj vidis viron, irantan el la urbo,
kaj ili diris al li: Montru al ni la eniron en la urbon,
kaj ni faros al vi favoraĵon. **25** Kaj li montris al ili
la eniron en la urbon, kaj ili venkobatis la urbon
per glavo; sed tiun viron kaj lian tutan familion ili
forliberigis. **26** Kaj la viro iris en la landon de la
Ĥetidoj, kaj konstruis urbon, kaj donis al ĝi la nomon
Luz; tia estas ĝia nomo ĝis la nuna tago. **27** Kaj Manase
ne ekposedis la urbojn Bet-Ŝean kun ĝiaj urbetoj kaj
Taanaĥ kun ĝiaj urbetoj, kaj la loĝantojn de Dor kaj
de ĝiaj urbetoj kaj la loĝantojn de Jibleam kaj de ĝiaj
urbetoj kaj la loĝantojn de Megido kaj de ĝiaj urbetoj;
kaj la Kanaanidoj plue loĝis en tiu lando. **28** Kiam
Izrael fortiĝis, li faris la Kanaanidojn tributuloj, sed
ne elpelis ilin. **29** Kaj Efraim ne elpelis la Kanaanidojn,
kiuj loĝis en Gezer; kaj la Kanaanidoj loĝis inter li en
Gezer. **30** Zebulun ne forpelis la loĝantojn de Kitron,
nek la loĝantojn de Nahalol; kaj la Kanaanidoj loĝis
inter li, kaj fariĝis tributuloj. **31** Aŝer ne forpelis la
loĝantojn de Ako, nek la loĝantojn de Cidon, nek
de Aĥlab, nek de Aĥzib, nek de Ĥelba, nek de Afek,
nek de Reĥob. **32** Kaj la Aŝeridoj loĝis meze de la
Kanaanidoj, loĝantoj de la lando; ĉar ili ne forpelis
ilin. **33** Naftali ne forpelis la loĝantojn de Bet-Ŝemeŝ,
nek la loĝantojn de Bet-Anat; kaj li loĝis meze de la
Kanaanidoj, loĝantoj de la lando; kaj la loĝantoj de
Bet-Ŝemeŝ kaj de Bet-Anat fariĝis liaj tributuloj. **34**
Kaj la Amoridoj premis la Danidojn sur la monton, ne
permesante al ili malsupreniri en la valon. **35** Kaj la
Amoridoj plue loĝis sur la monto Ĥeres, en Ajalon kaj
en Ŝaalbim; sed la mano de la Jozefidoj pezis sur ili,
kaj ili fariĝis tributuloj. **36** Kaj la limo de la Amoridoj
estis de la loko, kie leviĝas Akrabim, de Sela pli alten.

**2** Kaj venis anĝelo de la Eternulo el Gilgal al Boĥim,
kaj diris: Mi elkondukis vin el Egiptujo, kaj venigis

vin en la landon, pri kiu Mi ĵuris al viaj patroj, kaj Mi
diris: Mi neniam rompos Mian interligon kun vi; 2 sed
vi ne faru interligon kun la loĝantoj de ĉi tiu lando,
iliajn altarojn detruu. Sed vi ne obeis Mian voĉon; kial
vi tion faris? 3 Tial Mi diras: Mi ne forpelos ilin de
vi, kaj ili estos por vi kaptilo, kaj iliaj dioj estos por
vi falilo. 4 Kaj kiam la anĝelo de la Eternulo parolis
tiujn vortojn al ĉiuj Izraelidoj, la popolo levis sian
voĉon kaj ploris. 5 Kaj ili donis al tiu loko la nomon
Boĥim. Kaj ili tie buĉis oferojn al la Eternulo. 6 Kaj
Josuo forliberigis la popolon, kaj la Izraelidoj iris ĉiu
al sia hereda parto, por ekposedi la landon. 7 Kaj la
popolo servis al la Eternulo dum la tuta vivo de Josuo,
kaj dum la tuta vivo de la plejaĝuloj, kiuj vivis longe
post Josuo, kaj kiuj vidis ĉiujn grandajn farojn de la
Eternulo, kiujn Li faris al Izrael. 8 Kaj mortis Josuo,
filo de Nun, servanto de la Eternulo, en la aĝo de
cent dek jaroj. 9 Kaj oni enterigis lin inter la limoj
de lia posedaĵo en Timnat-Ĥeres, sur la monto de
Efraim, norde de la monto Gaaŝ. 10 Kaj ankaŭ tiu tuta
generacio alkolektiĝis al siaj patroj; kaj aperis post
ili generacio alia, kiu ne konis la Eternulon, nek la
farojn, kiujn Li faris al Izrael. 11 Kaj la Izraelidoj faris
malbonon antaŭ la okuloj de la Eternulo, kaj servis al
Baaloj. 12 Kaj ili forlasis la Eternulon, Dion de iliaj
patroj, kiu elkondukis ilin el la lando Egipta, kaj ili
sekvis aliajn diojn, el la dioj de la popoloj, kiuj estis
ĉirkaŭ ili, kaj ili adoris ilin, kaj kolerigis la Eternulon.
13 Kaj ili forlasis la Eternulon, kaj servis al Baal kaj al
Aŝtar. 14 Kaj ekflamis la kolero de la Eternulo kontraŭ
Izrael, kaj Li transdonis ilin en la manojn de rabistoj,
kiuj prirabis ilin, kaj Li vendis ilin en la manojn de
iliaj malamikoj ĉirkaŭe; kaj ili ne povis plu sin teni
antaŭ siaj malamikoj. 15 Kien ajn ili iris, la mano de la
Eternulo estis kontraŭ ili por malbono, kiel la Eternulo
diris kaj kiel la Eternulo ĵuris al ili; kaj ili estis tre
premataj. 16 Kaj la Eternulo starigis juĝistojn, kiuj
savis ilin el la manoj de iliaj rabintoj; 17 tamen ankaŭ
la juĝistojn ili ne obeis, sed ili malĉastis kun aliaj
dioj kaj adoris ilin, rapide dekliniĝis de la vojo, kiun
iris iliaj patroj, obeante la ordonojn de la Eternulo;
ili tiel ne agis. 18 Kaj kiam la Eternulo starigis por
ili juĝistojn, kaj la Eternulo estis kun la juĝisto, kaj
savadis ilin el la manoj de iliaj malamikoj dum la
tuta vivo de la juĝisto, ĉar la Eternulo kompatis ilin,
kiam ili ĝemis pro siaj turmentantoj kaj premantoj: 19
tiam, apenaŭ la juĝisto mortis, ili denove fariĝis pli
malbonaj ol iliaj patroj, sekvante aliajn diojn, servante
al ili, kaj adorante ilin. Ili ne dekliniĝis de siaj faroj
kaj de sia malbona vojo. 20 Kaj ekflamis la kolero de la
Eternulo kontraŭ Izrael, kaj Li diris: Ĉar ĉi tiu popolo
malobeis Mian interligon, kiun Mi donis al iliaj patroj,
kaj ne aŭskultis Mian voĉon, 21 tial Mi ankaŭ forpelos
de ili neniun el la popoloj, kiujn restigis Josuo, kiam li
mortis; 22 por elprovi per ili Izraelon, ĉu ili observos
la vojon de la Eternulo kaj iros ĝin, kiel observis iliaj
patroj, aŭ ne. 23 Kaj la Eternulo restigis tiujn popolojn,
kaj ne rapidis elpeli ilin, kaj ne transdonis ilin en la
manojn de Josuo.

3 Kaj jen estas la popoloj, kiujn la Eternulo restigis,
por elprovi per ili Izraelon, ĉiujn, kiuj ne sciis
pri ĉiuj militoj kontraŭ Kanaan; 2 por ke eksciu la
generacioj de la Izraelidoj, por lernigi militon al tiuj,
kiuj antaŭe ne konis ĝin: 3 kvin princoj de Filiŝtoj, kaj
ĉiuj Kanaanidoj, kaj Cidonanoj, kaj Ĥividoj, kiuj loĝis
sur la monto Lebanon, de la monto Baal-Ĥermon ĝis
la eniro de Ĥamat. 4 Ili restis, por elprovi per ili la
Izraelidojn, por sciiĝi, ĉu ili obeos la ordonojn de la
Eternulo, kiujn Li donis al iliaj patroj per Moseo. 5
Kaj la Izraelidoj loĝis meze de la Kanaanidoj, Ĥetidoj
kaj Amoridoj kaj Perizidoj kaj Ĥividoj kaj Jebusidoj.
6 Kaj ili prenis al si iliajn filinojn kiel edzinojn, kaj
siajn filinojn ili donis al iliaj filoj, kaj ili servis al
iliaj dioj. 7 Kaj la Izraelidoj faris malbonon antaŭ la
okuloj de la Eternulo, kaj forgesis la Eternulon, sian
Dion, kaj servis al Baaloj kaj al sanktaj stangoj. 8 Kaj
ekflamis la kolero de la Eternulo kontraŭ Izrael, kaj Li
transdonis ilin en la manojn de Kuŝan-Riŝataim, reĝo
de Mezopotamio; kaj la Izraelidoj servis al Kuŝan-
Riŝataim dum ok jaroj. 9 Kaj la Izraelidoj ekkriis al
la Eternulo, kaj la Eternulo aperigis savanton por
la Izraelidoj, kiu savis ilin: Otnielon, filon de Kenaz,
pli juna frato de Kaleb. 10 Kaj estis sur li la spirito
de la Eternulo, kaj li estis juĝisto de Izrael. Kaj li
eliris milite, kaj la Eternulo transdonis en lian manon
Kuŝan-Riŝataimon, reĝon de Mezopotamio, kaj lia
mano fariĝis forta super Kuŝan-Riŝataim. 11 Kaj la
lando ripozis dum kvardek jaroj; kaj mortis Otniel, filo
de Kenaz. 12 Kaj denove la Izraelidoj faris malbonon
antaŭ la okuloj de la Eternulo; kaj la Eternulo fortigis
Eglonon, reĝon de Moab, kontraŭ Izrael, pro tio, ke
ili faris malbonon antaŭ la okuloj de la Eternulo.
13 Kaj li aligis al si la Amonidojn kaj Amalekidojn,

kaj iris kaj venkobatis Izraelon, kaj ili ekposedis la
urbon de Palmoj. 14 Kaj la Izraelidoj servis al Eglon,
reĝo de Moab, dum dek ok jaroj. 15 Kaj la Izraelidoj
ekkriis al la Eternulo, kaj la Eternulo aperigis por
ili savanton, Ehudon, filon de Gera, Benjamenidon,
maldekstramanulon. Kaj la Izraelidoj sendis per li
donacojn al Eglon, reĝo de Moab. 16 Kaj Ehud faris al
si glavon dutranĉan, havantan la longon de unu ulno,
kaj zonis ĝin sub sia vesto al sia dekstra femuro. 17
Kaj li prezentis la donacojn al Eglon, reĝo de Moab;
Eglon estis homo tre grasdika. 18 Kaj kiam li finis
la prezentadon de la donacoj, li foririgis la homojn,
kiuj alportis la donacojn. 19 Sed li mem revenis de
la idoloj en Gilgal, kaj diris: Mi devas diri al vi ion
sekretan, ho reĝo. Kaj tiu diris: Silentu! Kaj eliris de
apud li ĉiuj, kiuj staris apud li. 20 Kaj Ehud eniris al
li, kiam li sidis en malvarmeta ĉambreto, kiu estis
por li sola; kaj Ehud diris: Mi havas por vi vorton de
Dio; kaj li leviĝis de la seĝo. 21 Tiam Ehud etendis
sian maldekstran manon, kaj prenis la glavon de sia
dekstra femuro, kaj enpuŝis ĝin en lian ventron tiel,
22 ke eĉ la tenilo eniris post la tranĉfero, kaj la graso
kovris la tranĉferon; ĉar li ne eltiris la glavon el lia
ventro, kaj ĝi trapenetris la postan parton de la korpo.
23 Kaj Ehud eliris en la vestiblon, kaj fermis post si la
pordon de la ĉambreto, kaj ŝlosis ĝin. 24 Kiam li eliris,
la servantoj de la reĝo venis, kaj vidis, ke la pordo de
la ĉambreto estas ŝlosita, kaj ili diris: Certe pro natura
bezono li estas en la malvarmeta ĉambreto. 25 Kaj
ili atendis longe, sed neniu malfermis la pordon de
la ĉambreto; tiam ili prenis la ŝlosilon kaj malŝlosis,
kaj ili vidis, ke ilia sinjoro kuŝas malviva sur la tero.
26 Kaj dum ili staris konsternitaj, Ehud forkuris, kaj
li preterpasis la idolojn kaj forkuris al Seira. 27 Kaj
kiam li alvenis, li ektrumpetis per korno sur la monto
de Efraim, kaj la Izraelidoj malsupreniris kun li de la
monto, kaj li estis antaŭ ili. 28 Kaj li diris al ili: Kuru
post mi; ĉar la Eternulo transdonis viajn malamikojn,
la Moabidojn, en viajn manojn. Kaj ili iris post li, kaj
okupis la transirejon de Jordan, kondukantan al Moab,
kaj permesis al neniu transiri. 29 Kaj ili mortigis en tiu
tempo ĉirkaŭ dek mil virojn el la Moabidoj, homojn
sanajn kaj fortajn; kaj neniu saviĝis. 30 Kaj en tiu tago
Moab humiliĝis sub la manojn de la Izraelidoj; kaj la
lando ripozis dum okdek jaroj. 31 Post li estis Ŝamgar,
filo de Anat; li mortigis sescent virojn el la Filiŝtoj per
bova bastono; kaj li ankaŭ savis Izraelon.

4 Kaj la Izraelidoj denove faris malbonon antaŭ la
okuloj de la Eternulo, kiam Ehud mortis. 2 Kaj
la Eternulo transdonis ilin en la manojn de Jabin,
Kanaana reĝo, kiu reĝis en Ĥacor; lia militistestro estis
Sisera, kiu loĝis en Ĥaroŝet-Goim. 3 Kaj la Izraelidoj
ekkriis al la Eternulo; ĉar tiu havis naŭcent ferajn
ĉarojn, kaj li forte premis la Izraelidojn dum dudek
jaroj. 4 Debora, profetino, edzino de Lapidot, estis
en tiu tempo juĝistino de la Izraelidoj; 5 ŝi sidadis
sub la palmo de Debora, inter Rama kaj Bet-El, sur la
monto de Efraim; kaj la Izraelidoj venadis al ŝi por
juĝo. 6 Kaj ŝi sendis kaj alvokigis Barakon, filon de
Abinoam, el Kedeŝ-Naftali, kaj diris al li: La Eternulo,
Dio de Izrael, ordonis: Iru, konduku la militistaron sur
la monton Tabor, kaj prenu kun vi dek mil virojn el la
Naftaliidoj kaj el la Zebulunidoj; 7 kaj al la torento
Kiŝon Mi alkondukos al vi Siseran, la militistestron
de Jabin, kaj liajn ĉarojn kaj lian amasegon; kaj Mi
transdonos lin en viajn manojn. 8 Tiam diris al ŝi
Barak: Se vi iros kun mi, mi iros; sed se vi ne iros kun
mi, mi ne iros. 9 Kaj ŝi respondis: Bone, mi iros kun
vi; sed vi ne havos gloron sur la vojo, kiun vi iros;
ĉar en la manojn de virino la Eternulo transdonos
Siseran. Kaj Debora leviĝis, kaj iris kun Barak al Kedeŝ.
10 Kaj Barak vokis la Zebulunidojn kaj la Naftaliidojn
al Kedeŝ; kaj lin sekvis dek mil viroj, kaj Debora iris
kun li. 11 Ĥeber, la Kenido, apartiĝis de la Kenidoj, de
la idoj de Ĥobab, bofrato de Moseo, kaj li starigis sian
tendon apud la kverkaro en Caananim, apud Kedeŝ.
12 Kaj oni sciigis Siseran, ke Barak, filo de Abinoam,
supreniris sur la monton Tabor. 13 Kaj Sisera kunvokis
ĉiujn siajn ĉarojn, naŭcent ferajn ĉarojn, kaj la tutan
popolon, kiu estis kun li, el Ĥaroŝet-Goim al la torento
Kiŝon. 14 Tiam Debora diris al Barak: Leviĝu, ĉar nun
estas la tago, en kiu la Eternulo transdonos Siseran en
viajn manojn; jen la Eternulo eliris antaŭ vi. Kaj Barak
malsupreniris de la monto Tabor, kaj post li dek mil
viroj. 15 Kaj la Eternulo ĵetis konfuzon sur Siseran kaj
sur ĉiujn ĉarojn kaj sur la tutan militistaron, antaŭ
la glavo de Barak; kaj Sisera deiris de la ĉaro kaj
forkuris piede. 16 Kaj Barak persekutis la ĉarojn kaj la
militistaron ĝis Ĥaroŝet-Goim; kaj la tuta militistaro
de Sisera falis de glavo; restis neniu. 17 Sed Sisera
forkuris piede al la tendo de Jael, edzino de la Kenido
Ĥeber; ĉar estis paco inter Jabin, reĝo de Ĥacor, kaj la
domo de la Kenido Ĥeber. 18 Kaj Jael eliris renkonte al
Sisera, kaj diris al li: Eniru, mia sinjoro, eniru al mi; ne

timu. Kaj li eniris al ŝi en la tendon, kaj ŝi kovris lin
per litkovrilo. 19 Kaj li diris al ŝi: Donu al mi por trinki
iom da akvo, ĉar mi soifas. Kaj ŝi malfermis felsakon
kun lakto kaj donis al li por trinki, kaj kovris lin. 20
Kaj li diris al ŝi: Staru ĉe la pordo de la tendo, kaj se iu
venos kaj demandos vin, kaj diros: Ĉu iu estas ĉi tie?
tiam diru, ke neniu estas. 21 Kaj Jael, edzino de Ĥeber,
prenis najlon de la tendo kaj metis martelon en sian
manon kaj aliris al li mallaŭte, kaj enbatis la najlon
en lian tempion tiel, ke ĝi enpenetris en la teron. Li
dormis, lacigita; kaj li mortis. 22 Kaj Barak postkuris
Siseran. Kaj Jael eliris al li renkonte, kaj diris al li:
Venu, mi montros al vi la viron, kiun vi serĉas. Kaj
li venis al ŝi, kaj li vidis, ke Sisera kuŝas malviva kaj
najlo estas en lia tempio. 23 Tiel Dio humiligis en tiu
tago Jabinon, reĝon de Kanaan, antaŭ la Izraelidoj. 24
Kaj la mano de la Izraelidoj ĉiam pli fortiĝis super
Jabin, reĝo de Kanaan, ĝis ili ekstermis Jabinon, reĝon
de Kanaan.

**5** Kaj ekkantis Debora, kaj Barak, filo de Abinoam,
en tiu tago, jene: 2 Ĉar la ĉefoj gvidis en Izrael
Kaj la popolo montris sin fervora, Benu la Eternulon.
3 Aŭskultu, ho reĝoj; atentu, ho princoj: Mi al la
Eternulo, mi kantas; Mi ludas al la Eternulo, Dio de
Izrael. 4 Ho Eternulo! kiam Vi eliris de Seir, Kiam Vi
iris de la kampo de Edom, Tremis la tero, kaj la ĉielo
fluigis gutojn, Kaj la nuboj gutigis akvon. 5 La montoj
fluis antaŭ la Eternulo, Tiu Sinaj antaŭ la Eternulo,
Dio de Izrael. 6 En la tempo de Ŝamgar, filo de Anat,
En la tempo de Jael, forlasitaj estis la vojoj, Kaj tiuj,
kiuj devis iri sur la vojoj, iris laŭ flankaj vojetoj. 7
Forestis juĝistoj en Izrael, forestis, Ĝis stariĝis mi,
Debora, Ĝis stariĝis mi, patrino en Izrael. 8 Oni elektis
novajn diojn; Kaj tiam milito aperis antaŭ la pordego.
Ĉu iu vidis ŝildon aŭ lancon Ĉe la kvardek miloj de
Izrael? 9 Mia koro estas kun la estroj de Izrael, Kun
la fervoruloj en la popolo; Benu la Eternulon. 10 Vi,
kiuj rajdas sur blankaj azeninoj, Vi, kiuj sidas sur
tapiŝoj, Kaj vi, kiuj iras sur la vojo, kantu! 11 Inter la
kantoj de la pafarkistoj ĉe la akvoĉerpejoj, Tie oni
prikantos la justecon de la Eternulo, La justecon de Lia
estrado en Izrael. Tiam eliris al la pordego la popolo
de la Eternulo. 12 Vekiĝu, vekiĝu, Debora, Vekiĝu,
vekiĝu, kantu kanton; Leviĝu, Barak, kaj konduku viajn
kaptitojn, filo de Abinoam! 13 Tiam eliris la restintoj
el la fortuloj de la popolo; La Eternulo eliris kun mi
inter la herooj. 14 De Efraim venis tiuj, kiuj havas
siajn radikojn en Amalek; Post vi venis Benjamen en
via popolo; De Maĥir venis estroj, Kaj de Zebulun
kondukantoj per princa bastono. 15 Kaj princoj el
Isaĥar estis kun Debora, Kaj Isaĥar, kiel Barak, kuris
en la valon. Ĉe la torentoj de Ruben estas grandaj
konsiliĝoj. 16 Kial vi sidas inter la baraĵoj, Aŭskultante
la fajfadon ĉe la brutaroj? Ĉe la torentoj de Ruben
estas grandaj konsiliĝoj. 17 Gilead restis transe de
Jordan; Kaj kial Dan sidas sur la ŝipoj? Aŝer sidas sur la
bordo de la maro, Kaj loĝas ĉe siaj golfoj. 18 Zebulun
estas popolo, kiu riskis sian animon por la morto, Kaj
Naftali sur la altaĵoj de la kampo. 19 Venis reĝoj, ili
batalis; Tiam batalis reĝoj de Kanaan En Taanaĥ, ĉe la
akvo de Megido; Sed ili ricevis neniom da mono. 20
El la ĉielo oni batalis; La steloj de siaj vojoj batalis
kontraŭ Sisera. 21 La torento Kiŝon forportis ilin, La
torento antikva, la torento Kiŝon. Piedpremu, mia
animo, la fortulojn. 22 Tiam frapis la hufoj de ĉevaloj
Pro la rapidega forkurado de fortuloj. 23 Malbenu la
urbon Meroz, diris anĝelo de la Eternulo, Malbenu,
malbenu ĝiajn loĝantojn; Ĉar ili ne venis kun helpo al
la Eternulo, Kun helpo al la Eternulo inter la herooj. 24
Benita estu inter la virinoj Jael, La edzino de la Kenido
Ĥeber, Inter la virinoj en la tendo ŝi estu benita. 25
Akvon li petis, lakton ŝi donis; En belega kaliko ŝi
alportis buteron. 26 Ŝi etendis sian manon al najlo Kaj
sian dekstran manon al martelo de laboristoj; Kaj ŝi
ekbatis Siseran, ekfrapis lian kapon, Kaj frakasis kaj
traboris lian tempion. 27 Al ŝiaj piedoj li kliniĝis kaj
falis kaj ekkuŝis; Al ŝiaj piedoj li kliniĝis kaj falis; Kie li
kliniĝis, tie li falis pereinta. 28 Tra la fenestro rigardas,
kaj plorkrias tra la krado, la patrino de Sisera: Kial
longe ne venas lia ĉaro? Kial malfruiĝas la radoj de
liaj kaleŝoj? 29 La saĝaj el ŝiaj sinjorinoj respondas
al ŝi, Kaj ŝi mem al si respondas: 30 Ili ja trovis kaj
dividas militakiron; Po unu aŭ po du knabinoj por ĉiu
viro, Diverskolorajn vestojn por Sisera, Diverskolorajn
vestojn broditajn, Ambaŭflanke broditajn por la kolo.
31 Tiel pereu ĉiuj Viaj malamikoj, ho Eternulo! Sed Liaj
amantoj estu kiel la leviĝanta suno en sia potenco.
Kaj la lando ripozis dum kvardek jaroj.

**6** Kaj la Izraelidoj faris malbonon antaŭ la okuloj de
la Eternulo; kaj la Eternulo transdonis ilin en la
manojn de Midjan por la daŭro de sep jaroj. 2 Kaj
la mano de Midjan forte premis Izraelon. Kontraŭ

la Midjanidoj la Izraelidoj faris al si la fendegojn en
la montoj kaj la kavernojn kaj la fortikaĵojn. 3 Kaj
kiam la Izraelidoj semis, tiam venadis la Midjanidoj
kaj la Amalekidoj kaj la orientanoj, kaj atakadis ilin, 4
kaj stariĝadis tendare kontraŭ ili, kaj ekstermadis la
produktojn de la tero sur la tuta spaco ĝis Gaza, kaj ne
restigadis porvivaĵon ĉe la Izraelidoj, nek ŝafon, nek
bovon, nek azenon. 5 Ĉar ili venadis kun siaj brutoj
kaj tendoj en multego, simile al akridoj; kaj ili kaj iliaj
kameloj estis sennombraj, kaj ili venadis en la landon,
por dezertigi ĝin. 6 Kaj Izrael tre mizeriĝis de Midjan;
kaj la Izraelidoj ekkriis al la Eternulo. 7 Kaj kiam la
Izraelidoj ekkriis al la Eternulo pro Midjan, 8 tiam
la Eternulo sendis profeton al la Izraelidoj, kaj ĉi tiu
diris al ili: Tiel diras la Eternulo, la Dio de Izrael: Mi
venigis vin el Egiptujo, kaj Mi elkondukis vin el la
domo de sklaveco, 9 kaj Mi savis vin el la manoj de
la Egiptoj kaj el la manoj de ĉiuj viaj premantoj, kaj
Mi forpelis ilin de vi, kaj Mi donis al vi ilian landon;
10 kaj Mi diris al vi: Mi estas la Eternulo, via Dio; ne
timu la diojn de la Amoridoj, en kies lando vi loĝas;
sed vi ne obeis Mian voĉon. 11 Kaj venis anĝelo de
la Eternulo, kaj sidiĝis sub kverko, kiu estis en Ofra
kaj apartenis al Joaŝ la Abiezrido; lia filo Gideon estis
draŝanta tritikon en vinpremejo, por kaŝi antaŭ la
Midjanidoj. 12 Kaj aperis al li la anĝelo de la Eternulo,
kaj diris al li: La Eternulo estas kun vi, brava heroo! 13
Kaj Gideon diris al li: Mia sinjoro! se la Eternulo estas
kun ni, tiam kial trafis nin ĉio ĉi tio? kaj kie estas
ĉiuj Liaj mirakloj, pri kiuj rakontis al ni niaj patroj,
dirante: La Eternulo elkondukis ja nin el Egiptujo? Kaj
nun la Eternulo forlasis nin, kaj transdonis nin en la
manojn de Midjan. 14 Kaj la Eternulo Sin turnis al li,
kaj diris: Iru kun ĉi tiu via forto, kaj savu Izraelon el la
manoj de Midjan; jen Mi sendas vin. 15 Kaj tiu diris al
Li: Mia Sinjoro! per kio mi savos Izraelon? mia familio
estas ja la plej mizera en Manase, kaj mi estas la plej
juna en la domo de mia patro! 16 Kaj la Eternulo
diris al li: Sed Mi estos kun vi, kaj vi venkobatos la
Midjanidojn kiel unu homon. 17 Kaj li diris al Li: Se mi
akiris Vian favoron, donu al mi pruvosignon, ke tio
estas Vi, kiu parolas kun mi; 18 ne foriru de ĉi tie, ĝis
mi venos al Vi kaj alportos mian oferaĵon kaj metos
antaŭ Vin. Kaj Li diris: Mi restos, ĝis vi revenos. 19
Kaj Gideon venis, kaj pretigis kapridon kaj macojn el
efo da faruno; la viandon li metis en korbon kaj la
brogaĵon li enverŝis en poton, kaj alportis al Li sub la
kverkon kaj proponis. 20 Kaj la anĝelo de Dio diris al
li: Prenu la viandon kaj la macojn kaj metu sur ĉi tiun
rokon, kaj la brogaĵon elverŝu. Kaj li faris tiel. 21 Kaj la
anĝelo de la Eternulo etendis la finon de la bastono,
kiu estis en lia mano, kaj ektuŝis la viandon kaj la
macojn; kaj tiam eliris fajro el la roko kaj konsumis la
viandon kaj la macojn; kaj la anĝelo de la Eternulo
foriris de antaŭ liaj okuloj. 22 Tiam Gideon vidis, ke
tio estis anĝelo de la Eternulo; kaj Gideon diris: Ho ve,
mia Sinjoro, ho Eternulo! ĉar mi vidis anĝelon de la
Eternulo, vizaĝon kontraŭ vizaĝo. 23 Sed la Eternulo
diris al li: Paco al vi; ne timu; vi ne mortos. 24 Kaj
Gideon konstruis tie altaron al la Eternulo, kaj donis
al ĝi la nomon: La Eternulo estas Paco. Ĝis la nuna
tago ĝi estas ankoraŭ en Ofra de la Abiezridoj. 25 Kaj
en tiu nokto diris al li la Eternulo: Prenu junan bovon
de via patro, kaj alian bovon sepjaran, kaj detruu la
altaron de Baal, kiu estas ĉe via patro, kaj la sanktan
stangon, kiu estas apud ĝi, dehaku; 26 kaj konstruu
altaron al la Eternulo, via Dio, sur la supro de ĉi tiu
roko, laŭ la reguloj, kaj prenu la duan bovon, kaj
alportu bruloferon sur la ligno de la sankta stango,
kiun vi dehakos. 27 Kaj Gideon prenis dek homojn el
siaj servantoj, kaj faris, kiel diris al li la Eternulo; sed
ĉar li timis la domanojn de sia patro kaj la urbanojn,
por fari tion en la tago, tial li faris en la nokto. 28 Kiam
frue matene la urbanoj leviĝis, ili ekvidis, ke la altaro
de Baal estas detruita, kaj la sankta stango, kiu estas
apud ĝi, estas dehakita, kaj la dua bovo estas alportita
kiel brulofero sur la konstruita altaro. 29 Kaj ili diris
unu al alia: Kiu tion faris? Kaj ili serĉis kaj demandis,
kaj oni diris: Gideon, filo de Joaŝ, faris tion. 30 Tiam la
urbanoj diris al Joaŝ: Elirigu vian filon; li devas morti,
ĉar li detruis la altaron de Baal, kaj ĉar li dehakis la
sanktan stangon, kiu estis apud ĝi. 31 Sed Joaŝ diris al
ĉiuj, kiuj staris antaŭ li: Ĉu vi bezonas batali por Baal?
ĉu vi bezonas helpi lin? kiu batalos por li, tiu mortos
ĉi tiun matenon. Se li estas dio, li mem batalu por si
pro tio, ke oni detruis lian altaron. 32 Kaj de tiu tago
oni nomis lin Jerubaal, dirante: Baal batalu kontraŭ
li, ĉar li detruis lian altaron. 33 Kaj ĉiuj Midjanidoj
kaj Amalekidoj kaj orientanoj kolektiĝis kune, kaj
transiris kaj stariĝis tendare en la valo Jizreel. 34 Kaj
la spirito de la Eternulo venis sur Gideonon, kaj li
ekblovis per trumpeto; kaj la familio de la Abiezridoj
kolektiĝis, por sekvi lin. 35 Kaj li sendis senditojn al
la tuta Manase, kaj ankaŭ ili sekvis lin; kaj li sendis

senditojn al Aŝer kaj al Zebulun kaj al Naftali, kaj
ili eliris renkonte. 36 Kaj Gideon diris al Dio: Se Vi
intencas helpi per mia mano Izraelon, kiel Vi diris, 37
en tia okazo jen mi metas sur la draŝejon tonditan
lanon: se estos roso nur sur la lano, kaj sur la tuta
tero estos seke, tiam mi scios, ke Vi helpos per mia
mano Izraelon, kiel Vi diris. 38 Kaj tiel fariĝis: kiam
la morgaŭan tagon li matene leviĝis, li elpremis la
lanon, kaj elpremis el la lano roson, plenan kalikon da
akvo. 39 Kaj Gideon diris al Dio: Ne koleru min, se mi
ankoraŭ unu fojon ekparolos, kaj ankoraŭ nur unu
fojon faros provon kun la lano: estu sekeco nur sur la
lano, kaj sur la tuta tero estu roso. 40 Kaj Dio faris tiel
en tiu nokto: estis sekeco nur sur la lano, kaj sur la
tuta tero estis roso.

7 Kaj frue matene leviĝis Jerubaal, tio estas Gideon,
kaj la tuta popolo, kiu estis kun li, kaj ili starigis sian
tendaron ĉe la fonto Ĥarod; kaj la tendaro de Midjan
estis rilate al li sur la norda flanko de la monteto
More en la valo. 2 Kaj la Eternulo diris al Gideon:
La popolo, kiu estas kun vi, estas tro grandnombra,
por ke Mi transdonu la Midjanidojn en iliajn manojn;
eble fieriĝos kontraŭ Mi Izrael, dirante: Mia mano
helpis min. 3 Tial nun proklamu al la oreloj de la
popolo jene: Kiu estas timema kaj tremema, tiu iru
returne kaj foriru de la monto Gilead. Kaj iris returne
el la popolo dudek du mil, kaj dek mil restis. 4 Kaj
la Eternulo diris al Gideon: Ankoraŭ estas tro multe
da popolo; konduku ilin malsupren al la akvo, kaj
tie Mi ilin elektos por vi. Pri kiu Mi diros al vi: Ĉi
tiu iru kun vi — tiu devas iri kun vi; kaj ĉiu, pri kiu
Mi diros al vi: Ĉi tiu ne iru kun vi — tiu ne devas
iri. 5 Kaj li alvenigis la popolon al la akvo. Kaj la
Eternulo diris al Gideon: Ĉiun, kiu lektrinkos akvon
per sia lango, kiel lektrinkas hundo, tiun starigu
aparte; ankaŭ ĉiun, kiu kliniĝos sur siaj genuoj, por
trinki. 6 Kaj la nombro de tiuj, kiuj lektrinkis el la
mano al la buŝo, estis tricent homoj; la tuta cetera
popolo kliniĝis sur siaj genuoj, por trinki la akvon. 7
Kaj la Eternulo diris al Gideon: Per la tricent homoj,
kiuj lektrinkis, Mi helpos vin, kaj Mi transdonos la
Midjanidojn en viajn manojn; kaj la tuta popolo foriru
ĉiu al sia loko. 8 Kaj ili prenis al si la manĝotaĵon de la
popolo, kaj iliajn trumpetojn; kaj ĉiujn Izraelidojn li
forsendis ĉiun al lia tendo, kaj la tricent homojn li
retenis. La tendaro de Midjan estis malsupre de li en
la valo. 9 En tiu nokto la Eternulo diris al li: Leviĝu,
iru malsupren en la tendaron; ĉar Mi transdonas ĝin
en viajn manojn. 10 Sed se vi timas malsupreniri,
tiam iru vi kun via junulo Pura al la tendaro, 11 kaj
aŭskultu, kion oni parolas; tiam fortiĝos viaj manoj,
kaj vi iros malsupren en la tendaron. Kaj li iris kun
sia junulo Pura al la unua armita taĉmenteto de la
tendaro. 12 La Midjanidoj kaj la Amalekidoj kaj ĉiuj
orientanoj kuŝis en la valo en tia multego, kiel akridoj;
kaj iliaj kameloj estis sennombraj, en tia multego,
kiel la sablo sur la bordo de la maro. 13 Gideon venis,
kaj jen unu rakontas al sia kamarado sonĝon, kaj
diras: Mi vidis en sonĝo, ke jen elbakita hordea pano
ruliĝis tra la tendaro de Midjan, kaj venis al tendo,
kaj ekfrapis ĝin tiel, ke ĝi falis, kaj renversis ĝin, kaj
la tendo tute kuŝis. 14 Tiam lia kamarado respondis,
dirante: Tio estas nenio alia, nur la glavo de Gideon,
filo de Joaŝ, Izraelido; Dio transdonis en lian manon la
Midjanidojn kaj la tutan tendaron. 15 Kaj kiam Gideon
aŭdis la rakonton pri la sonĝo kaj la klarigon de ĝia
signifo, li adorkliniĝis, kaj revenis en la tendaron
de la Izraelidoj, kaj diris: Leviĝu, ĉar la Eternulo
transdonis en viajn manojn la tendaron de Midjan. 16
Kaj li dividis la tricent homojn en tri taĉmentojn, kaj
donis al ĉiuj en la manojn trumpetojn kaj malplenajn
kruĉojn, kun torĉoj interne de la kruĉoj. 17 Kaj li diris
al ili: Rigardu min, kaj faru tion saman, kion mi faros;
jen mi iras al la rando de la tendaro, kaj kion mi faros,
tion faru ankaŭ vi. 18 Kiam mi kaj tiuj, kiuj estas kun
mi, ekblovos per trumpeto, tiam ankaŭ vi blovu per
la trumpetoj ĉirkaŭ la tuta tendaro, kaj kriu: Pro la
Eternulo kaj pro Gideon! 19 Kaj venis Gideon, kaj la
cent homoj, kiuj estis kun li, al la rando de la tendaro
en la komenco de la meza noktogardo, kiam ĵus
stariĝis la gardistoj; kaj ili ekblovis per la trumpetoj,
kaj rompis la kruĉojn, kiujn ili havis en la manoj. 20
Tiam ekblovis la tri taĉmentoj per la trumpetoj kaj
rompis la kruĉojn, kaj ili tenis en la maldekstra mano
la torĉojn, kaj en la dekstra la trumpetojn por blovi,
kaj ili kriis: Glavo pro la Eternulo kaj pro Gideon!
21 Kaj ili staris ĉiu sur sia loko ĉirkaŭ la tendaro;
kaj la tuta tendaranaro ekkuris; kaj ĉiuj ekkriis kaj
forkuris. 22 Kaj oni blovis per la tricent trumpetoj, kaj
la Eternulo turnis en la tuta tendaro la glavon de unu
kontraŭ alian; kaj la tendaranoj kuris ĝis Bet-Ŝita, al
Cerera, ĝis la limo de Abel-Meĥola apud Tabat. 23 Kaj
oni kunvokis la Izraelidojn el Naftali kaj el Aŝer kaj el

la tuta Manase, kaj ili postkuris la Midjanidojn. 24
Kaj Gideon sendis senditojn sur la tutan monton de
Efraim, por diri: Kuru renkonte al la Midjanidoj kaj
baru al ili la akvon ĝis Bet-Bara kaj ĝis Jordan. Kaj
kolektiĝis ĉiuj Efraimidoj kaj baris la vojon ĝis Bet-
Bara kaj ĝis Jordan. 25 Kaj ili kaptis Orebon kaj Zeebon,
du princojn de Midjan, kaj mortigis Orebon ĉe la roko
de Oreb, kaj Zeebon ili mortigis ĉe la vinpremejo de
Zeeb, kaj persekutis la Midjanidojn; kaj la kapojn de
Oreb kaj Zeeb ili alportis al Gideon trans Jordanon.

8 Kaj la Efraimidoj diris al li: Kial vi tion faris al ni, ke
vi ne vokis nin, kiam vi iris batali kontraŭ Midjan?
Kaj ili forte kverelis kun li. 2 Sed li diris al ili: Kion
mi faris nun similan al via faro? ĉu la postkolekto de
Efraim ne estas pli bona ol la tuta vinberkolekto de
Abiezer? 3 En viajn manojn Dio transdonis Orebon
kaj Zeebon, la princojn de Midjan; kaj kiel mi povis
fari en komparo kun tio, kion vi faris? Tiam kvietiĝis
ilia kolero kontraŭ li, kiam li diris tion. 4 Kaj Gideon
venis al Jordan kaj transiris, li kaj la tricent homoj,
kiuj estis kun li, lacaj kaj persekutantaj. 5 Kaj li diris
al la loĝantoj de Sukot: Donu, mi petas, panojn al
la homoj, kiuj sekvas min; ĉar ili estas lacaj, kaj mi
postkuras Zebaĥon kaj Calmunan, reĝojn de Midjan.
6 Sed la estroj de Sukot diris: Ĉu la manoj de Zebaĥ
kaj Calmuna estas jam en viaj manoj, ke ni donu al
via militistaro panon? 7 Tiam Gideon diris: Pro tio,
kiam la Eternulo transdonos Zebaĥon kaj Calmunan
en miajn manojn, mi draŝos viajn korpojn per dornoj
de dezerto kaj per kardoj. 8 Kaj li iris de tie al Penuel,
kaj diris al ĝiaj loĝantoj tion saman; kaj la loĝantoj de
Penuel respondis al li tiel, kiel respondis la loĝantoj
de Sukot. 9 Kaj li diris ankaŭ al la loĝantoj de Penuel
jene: Kiam mi revenos feliĉe, mi detruos ĉi tiun turon.
10 Kaj Zebaĥ kaj Calmuna estis en Karkor, kaj kun
ili estis ilia militistaro, ĉirkaŭ dek kvin mil, ĉiuj,
kiuj restis el la tuta militistaro de la orientanoj; la
nombro de la falintoj estis cent dudek mil homoj,
kiuj povis eltiri glavon. 11 Kaj Gideon iris laŭ la vojo
de la tendoloĝantoj orienten de Nobaĥ kaj Jogbeha,
kaj venkobatis la tendaron, kiam la tendaro opiniis
sin tute eksterdanĝera. 12 Kaj Zebaĥ kaj Calmuna
forkuris; sed li postkuris ilin, kaj kaptis Zebaĥon
kaj Calmunan, la du reĝojn de Midjan, kaj la tutan
militistaron li ektremigis. 13 Kaj revenis Gideon, filo
de Joaŝ, de la milito, de la deklivo de Ĥeres. 14 Kaj li
kaptis junulon el la loĝantoj de Sukot, kaj demandis
lin; kaj tiu skribis al li la estrojn de Sukot kaj ĝiajn
plejaĝulojn, sepdek sep homojn. 15 Kaj li venis al
la loĝantoj de Sukot, kaj diris: Jen estas Zebaĥ kaj
Calmuna, pri kiuj vi mokis min, dirante: Ĉu la manoj
de Zebaĥ kaj Calmuna estas jam en viaj manoj, ke ni
donu al viaj lacaj homoj panon? 16 Kaj li prenis la
plejaĝulojn de la urbo, kaj la dornojn de dezerto kaj la
kardojn, kaj punis per ili la loĝantojn de Sukot. 17 Kaj
la turon de Penuel li detruis, kaj mortigis la loĝantojn
de la urbo. 18 Kaj li diris al Zebaĥ kaj Calmuna: Kiaj
estis la homoj, kiujn vi mortigis ĉe Tabor? Kaj ili diris:
Ili estis tiaj, kiel vi, ĉiuj aspektis kiel reĝidoj. 19 Tiam
li diris: Tio estis miaj fratoj, filoj de mia patrino. Per
la vivo de la Eternulo, se vi restigus ilin vivaj, mi
ne mortigus vin. 20 Kaj li diris al sia unuenaskito
Jeter: Leviĝu, mortigu ilin. Sed la junulo ne eltiris
sian glavon; ĉar li timis, ĉar li estis ankoraŭ juna. 21
Kaj Zebaĥ kaj Calmuna diris: Leviĝu mem kaj frapu
nin, ĉar kia estas la viro, tia estas lia forto. Tiam
Gideon leviĝis kaj mortigis Zebaĥon kaj Calmunan,
kaj li prenis la ornamaĵojn, kiuj estis sur la koloj de
iliaj kameloj. 22 Kaj la Izraelidoj diris al Gideon: Regu
nin, vi kaj via filo kaj la filo de via filo; ĉar vi savis
nin el la manoj de Midjan. 23 Sed Gideon diris al ili:
Mi ne regos vin, kaj ankaŭ mia filo ne regos vin: la
Eternulo regu vin. 24 Kaj Gideon diris al ili: Mi petas
de vi peton, ĉiu el vi donu al mi la orelringon el sia
militakiro. Ili havis orajn orelringojn, ĉar estis afero
kun Iŝmaelidoj. 25 Kaj ili diris: Ni donos. Kaj ili sternis
veston, kaj ĉiu ĵetis tien orelringon el sia militakiro.
26 Kaj la pezo de la oraj orelringoj, kiujn li elpetis,
estis mil sepcent sikloj da oro, krom la ornamaĵoj
kaj la ringoj kaj la purpuraj vestoj, kiuj estis sur la
reĝoj de Midjan, kaj krom la kolornamaĵoj, kiuj estis
sur la koloj de iliaj kameloj. 27 Kaj Gideon faris el
tio efodon, kaj lokmetis ĝin en sia urbo, en Ofra; kaj
ĉiuj Izraelidoj malĉastiĝis per ĝi tie; kaj tio fariĝis
falilo por Gideon kaj por lia domo. 28 Kaj humiliĝis la
Midjanidoj antaŭ la Izraelidoj kaj ne levis plu sian
kapon. Kaj la lando ripozis dum kvardek jaroj en la
tempo de Gideon. 29 Kaj Jerubaal, filo de Joaŝ, iris
kaj ekloĝis en sia domo. 30 Kaj Gideon havis sepdek
filojn, kiuj eliris el liaj lumboj, ĉar li havis multe da
edzinoj. 31 Kaj lia kromvirino, kiu estis en Ŝeĥem,
ankaŭ naskis al li filon, kaj li donis al li la nomon
Abimeleĥ. 32 Kaj Gideon, filo de Joaŝ, mortis en tre

maljuna ago; kaj oni enterigis lin en la tombo de Joaŝ,
lia patro, en Ofra de la Abiezridoj. 33 Kiam Gideon
mortis, la Izraelidoj denove malĉaste sekvis la Baalojn
kaj elektis al si Baal-Beriton kiel sian dion. 34 Kaj la
Izraelidoj ne memoris la Eternulon, sian Dion, kiu
savadis ilin el la manoj de ĉiuj iliaj malamikoj ĉirkaŭe.
35 Kaj ili ne estis favorkoraj al la domo de Jerubaal-
Gideon rekompence al la tuta bono, kiun li faris al
Izrael.

9 Abimeleĥ, filo de Jerubaal, iris en Ŝeĥemon, al la
fratoj de sia patrino, kaj ekparolis al ili kaj al la
tuta familio de la domo de sia patrinpatro jene: 2 Diru
al la oreloj de ĉiuj loĝantoj de Ŝeĥem: Kio estas pli
bona al vi, ĉu ke regu vin sepdek homoj, ĉiuj filoj de
Jerubaal, aŭ ke regu vin unu homo? memoru ankaŭ,
ke mi estas via osto kaj via karno. 3 Kaj la fratoj de
lia patrino diris pri li al la oreloj de ĉiuj loĝantoj
de Ŝeĥem ĉiujn tiujn vortojn, kaj ilia koro inkliniĝis
al Abimeleĥ; ĉar ili diris: Li estas nia frato. 4 Kaj ili
donis al li sepdek arĝentajn monerojn el la domo
de Baal-Berit, kaj Abimeleĥ dungis per ili homojn
mallaboremajn kaj facilanimajn, kaj ili sekvis lin. 5
Kaj li venis en la domon de sia patro en Ofra, kaj
mortigis siajn fratojn, la filojn de Jerubaal, sepdek
homojn, sur unu ŝtono; restis Jotam, la plej juna filo
de Jerubaal, ĉar li kaŝiĝis. 6 Kaj kolektiĝis ĉiuj loĝantoj
de Ŝeĥem kaj la tuta domo de Milo, kaj ili iris kaj faris
Abimeleĥon reĝo, ĉe la kverko, kiu staras en Ŝeĥem.
7 Kaj oni diris pri tio al Jotam, kaj li iris kaj stariĝis
sur la supro de la monto Gerizim, kaj laŭte ekkriis,
kaj diris al ili: Aŭskultu min, loĝantoj de Ŝeĥem, kaj
aŭskultos vin Dio. 8 Iris la arboj, por sanktolei reĝon
super si; kaj ili diris al la olivarbo: Reĝu super ni. 9
Sed la olivarbo diris al ili: Ĉu mi perdis mian grason,
per kiu estas honorataj Dio kaj homoj, ke mi iru vagi
super la arboj? 10 Kaj la arboj diris al la figarbo: Iru
vi, reĝu super ni. 11 Sed la figarbo diris al ili: Ĉu mi
perdis mian dolĉecon kaj miajn bonajn fruktojn, ke
mi iru vagi super la arboj? 12 Kaj la arboj diris al la
vinberujo: Iru vi, reĝu super ni. 13 Sed la vinberujo
diris al ili: Ĉu mi perdis mian moston, kiu gajigas
Dion kaj homojn, ke mi iru vagi super la arboj? 14
Tiam ĉiuj arboj diris al la dornarbusto: Iru vi, reĝu
super ni. 15 Kaj la dornarbusto diris al la arboj: Se
vere vi sanktoleas min kiel reĝon super vi, tiam venu,
ŝirmu vin sub mia ombro; se ne, tiam eliros fajro el la
dornarbusto kaj forbruligos la cedrojn de Lebanon. 16
Nun ĉu vi agis ĝuste kaj juste, reĝigante Abimeleĥon?
kaj ĉu vi agis bone rilate Jerubaalon kaj lian domon,
kaj ĉu vi agis kun li konforme al lia merito? 17 Mia
patro batalis pro vi kaj ne ŝatis sian vivon kaj savis vin
el la manoj de Midjan; 18 kaj vi leviĝis nun kontraŭ la
domon de mia patro, kaj mortigis liajn filojn, sepdek
homojn, sur unu ŝtono, kaj Abimeleĥon, filon de
lia sklavino, vi reĝigis super la loĝantoj de Ŝeĥem,
pro tio, ke li estas via frato. 19 Se ĝuste kaj juste
vi agis nun rilate Jerubaalon kaj lian domon, tiam
ĝoju pri Abimeleĥ, kaj li ankaŭ ĝoju pri vi. 20 Sed
se ne, tiam eliru fajro el Abimeleĥ kaj forbruligu la
loĝantojn de Ŝeĥem kaj la domon de Milo; kaj fajro
eliru el la loĝantoj de Ŝeĥem kaj el la domo de Milo
kaj forbruligu Abimeleĥon. 21 Kaj Jotam forkuris kaj
forsavis sin kaj iris en Beeron kaj ekloĝis tie pro
timo antaŭ sia frato Abimeleĥ. 22 Kaj Abimeleĥ regis
super Izrael tri jarojn. 23 Kaj Dio venigis malbonan
spiriton inter Abimeleĥ kaj la loĝantoj de Ŝeĥem; kaj
la loĝantoj de Ŝeĥem perfidis Abimeleĥon, 24 por
ke la krimo pri la sepdek filoj de Jerubaal kaj ilia
sango venu sur Abimeleĥon, ilian fraton, kiu mortigis
ilin, kaj sur la loĝantojn de Ŝeĥem, kiuj subtenis
liajn manojn, por ke li mortigu siajn fratojn. 25 Kaj
la loĝantoj de Ŝeĥem starigis kontraŭ li insidantojn
sur la suproj de la montoj, kaj ili prirabadis ĉiun,
kiu pasis preter ili sur la vojo. Kaj oni diris tion al
Abimeleĥ. 26 Kaj venis Gaal, filo de Ebed, kun siaj
fratoj, kaj ili iris tra Ŝeĥem; kaj fidis lin la loĝantoj de
Ŝeĥem. 27 Kaj ili eliris sur la kampon kaj ŝirkolektis
siajn vinberojn kaj elpremis ilin kaj faris feston kaj
iris en la domon de sia dio kaj manĝis kaj drinkis
kaj malbenis Abimeleĥon. 28 Kaj Gaal, filo de Ebed,
diris: Kiu estas Abimeleĥ, kaj kio estas Ŝeĥem, ke ni
servu al li? li estas ja filo de Jerubaal, kaj Zebul estas
lia oficisto. Servu al la homoj de Ĥamor, patro de
Ŝeĥem, sed al tiu kial ni servu? 29 Se iu donus ĉi tiun
popolon en miajn manojn, mi forpelus Abimeleĥon.
Kaj oni diris al Abimeleĥ: Plimultigu vian militistaron,
kaj eliru. 30 Kiam Zebul, la estro de la urbo, aŭdis la
vortojn de Gaal, filo de Ebed, lia kolero ekflamis. 31
Kaj li sendis ruze senditojn al Abimeleĥ, por diri: Jen
Gaal, filo de Ebed, kun siaj fratoj venis en Ŝeĥemon
kaj ribeligas la urbon kontraŭ vi; 32 tial leviĝu en
la nokto, vi kaj la popolo, kiu estas kun vi, kaj faru
embuskon sur la kampo; 33 kaj matene, kiam leviĝos
la suno, leviĝu frue, kaj ataku la urbon; kaj kiam li

kaj la popolo, kiu estas kun li, eliros al vi, tiam faru
al li, kion via mano povos. 34 Kaj Abimeleĥ, kaj la
tuta popolo, kiu estis kun li, leviĝis en la nokto, kaj
faris apud Ŝeĥem embuskon el kvar taĉmentoj. 35
Kaj Gaal, filo de Ebed, eliris kaj stariĝis ĉe la pordego
de la urbo; kaj Abimeleĥ, kaj la popolo, kiu estis
kun li, leviĝis el la embusko. 36 Kiam Gaal ekvidis la
popolon, li diris al Zebul: Jen popolo malsupreniras
de la suproj de la montoj. Sed Zebul diris al li: La
ombro de la montoj ŝajnas al vi homoj. 37 Kaj Gaal
parolis plue, kaj diris: Jen popolo malsupreniras de la
altaĵo, kaj unu taĉmento venas laŭ la vojo de la kverko
de sorĉistoj. 38 Tiam Zebul diris al li: Kie nun estas
via buŝo, kiu diris: Kiu estas Abimeleĥ, ke ni servu
al li? Tio estas ja tiu popolo, kiun vi malŝatis; nun
eliru, kaj batalu kontraŭ ĝi. 39 Kaj Gaal eliris, havante
post si la loĝantojn de Ŝeĥem, kaj ekbatalis kontraŭ
Abimeleĥ. 40 Kaj Abimeleĥ ekpelis lin, kaj li forkuris,
kaj falis multe da mortigitoj ĝis la pordego mem.
41 Kaj Abimeleĥ restis en Aruma; kaj Zebul elpelis
Gaalon kaj liajn fratojn, ke ili ne loĝu en Ŝeĥem. 42
En la sekvanta tago la popolo eliris sur la kampon.
Kaj oni diris tion al Abimeleĥ. 43 Kaj li prenis sian
militistaron kaj dividis ĝin en tri taĉmentojn kaj faris
embuskon sur la kampo. Kiam li vidis, ke la popolo
eliras el la urbo, li leviĝis kontraŭ ili kaj batis ilin.
44 Kaj Abimeleĥ, kaj la taĉmentoj, kiuj estis kun li,
atakis kaj stariĝis antaŭ la pordego de la urbo; kaj
du taĉmentoj atakis ĉiujn, kiuj estis sur la kampo,
kaj mortigis ilin. 45 Kaj Abimeleĥ batalis kontraŭ la
urbo la tutan tiun tagon; kaj li prenis la urbon, kaj
mortigis la popolon, kiu estis en ĝi; kaj li detruis la
urbon kaj semis sur ĝia loko salon. 46 Kiam tion aŭdis
ĉiuj loĝantoj de la turo de Ŝeĥem, ili foriris en la
fortikaĵon de la dio Berit. 47 Kaj oni diris al Abimeleĥ,
ke kolektiĝis ĉiuj loĝantoj de la turo de Ŝeĥem. 48
Tiam Abimeleĥ iris sur la monton Calmon, li kaj la
tuta popolo, kiu estis kun li, kaj Abimeleĥ prenis
hakilon en sian manon kaj dehakis branĉon de arbo
kaj prenis ĝin kaj metis ĝin sur sian ŝultron, kaj diris
al la homoj, kiuj estis kun li: Kion vi vidis, ke mi faris,
tion rapide faru kiel mi. 49 Kaj ankaŭ ĉiuj el la tuta
popolo dehakis branĉojn kaj iris post Abimeleĥ kaj
almetis al la fortikaĵo kaj ekbruligis per ili la fortikaĵon
per fajro; kaj mortis ankaŭ ĉiuj homoj de la turo de
Ŝeĥem, ĉirkaŭ mil viroj kaj virinoj. 50 Kaj Abimeleĥ
iris al Tebec kaj sieĝis Tebecon kaj prenis ĝin. 51
Fortika turo estis meze de la urbo, kaj tien forkuris
ĉiuj viroj kaj virinoj kaj ĉiuj loĝantoj de la urbo, kaj
enŝlosis sin tie kaj supreniris sur la tegmenton de la
turo. 52 Kaj Abimeleĥ venis al la turo kaj sieĝis ĝin,
kaj aliris al la pordo de la turo, por forbruligi ĝin per
fajro. 53 Tiam iu virino ĵetis muelŝtonon sur la kapon
de Abimeleĥ kaj rompis al li la kranion. 54 Tiam li
rapide alvokis la junulon, kiu portis liajn batalilojn,
kaj diris al li: Eltiru vian glavon kaj mortigu min,
por ke oni ne diru pri mi: Virino lin mortigis. Kaj lia
junulo lin trapikis, kaj li mortis. 55 Kaj la Izraelidoj
vidis, ke Abimeleĥ mortis, kaj ili iris ĉiu al sia loko. 56
Tiel Dio repagis la malbonagon de Abimeleĥ, kiun ĉi
tiu faris rilate sian patron, mortigante siajn sepdek
fratojn. 57 Kaj la tutan malbonagon de la loĝantoj de
Ŝeĥem Dio revenigis sur ilian kapon; kaj venis sur ilin
la malbeno de Jotam, filo de Jerubaal.

**10** Post Abimeleĥ leviĝis, por helpadi al Izrael, Tola,
filo de Pua, filo de Dodo, Isaĥarido. Li loĝis en
Ŝamir, sur la monto de Efraim. 2 Kaj li estis juĝisto
de Izrael dum dudek tri jaroj, kaj li mortis, kaj oni
enterigis lin en Ŝamir. 3 Post li leviĝis Jair, Gileadano,
kaj li estis juĝisto de Izrael dum dudek du jaroj. 4
Li havis tridek filojn, kiuj rajdadis sur tridek junaj
azenoj, kaj ili havis tridek urbojn; ĝis nun oni ilin
nomas Vilaĝoj de Jair, kiuj estas en la lando Gilead. 5
Kaj Jair mortis, kaj oni enterigis lin en Kamon. 6 Kaj la
Izraelidoj plue faradis malbonon antaŭ la okuloj de la
Eternulo, kaj servadis al la Baaloj kaj al la Aŝtaroj kaj
al la dioj de Sirio kaj al la dioj de Cidon kaj al la dioj
de Moab kaj al la dioj de la Amonidoj kaj al la dioj de
la Filiŝtoj; kaj ili forlasis la Eternulon, kaj ne servadis
al Li. 7 Tiam ekflamis la kolero de la Eternulo kontraŭ
Izrael, kaj Li transdonis ilin en la manojn de la Filiŝtoj
kaj en la manojn de la Amonidoj. 8 Kaj ili premadis
kaj turmentadis la Izraelidojn de tiu jaro dum dek ok
jaroj, ĉiujn Izraelidojn, kiuj estis transe de Jordan en
la lando de la Amoridoj, kiu estas en Gilead. 9 Kaj la
Amonidoj transiris Jordanon, por militi ankaŭ kontraŭ
Jehuda kaj Benjamen kaj la domo de Efraim; kaj Izrael
estis tre premata. 10 Tiam ekkriis la Izraelidoj al la
Eternulo, dirante: Ni pekis antaŭ Vi, ĉar ni forlasis
nian Dion kaj servis al la Baaloj. 11 Kaj la Eternulo
diris al la Izraelidoj: Mi savis ja vin de la Egiptoj kaj de
la Amoridoj kaj de la Amonidoj kaj de la Filiŝtoj. 12
Kaj la Cidonanoj kaj Amalekidoj kaj Maonidoj premis

vin, kaj vi kriis al Mi, kaj Mi savis vin el iliaj manoj; 13 kaj tamen vi forlasis Min kaj servis al aliaj dioj; tial Mi ne plu helpos vin. 14 Iru kaj kriu al la dioj, kiujn vi elektis; ili helpu vin en la tempo de via mizero. 15 Kaj la Izraelidoj diris al la Eternulo: Ni pekis; faru al ni ĉion, kio plaĉas al Vi; nur savu nin hodiaŭ. 16 Kaj ili forigis el inter si la fremdajn diojn, kaj ekservis al la Eternulo; kaj Li eksentis kompaton pro la suferado de Izrael. 17 Kaj kolektiĝis la Amonidoj kaj stariĝis tendare en Gilead; kolektiĝis ankaŭ la Izraelidoj kaj stariĝis tendare en Micpa. 18 Kaj la estroj de Gilead diris unuj al la aliaj: Kiu komencos batalon kontraŭ la Amonidoj, tiu estos estro de ĉiuj loĝantoj de Gilead.

**11** Jiftaĥ, la Gileadano, estis heroa militisto, sed li estis filo de malĉastulino. De Gilead naskiĝis Jiftaĥ. 2 Kaj la edzino de Gilead naskis al li filojn. Kiam la filoj de la edzino grandiĝis, ili forpelis Jiftaĥon, kaj diris al li: Vi ne heredos en la domo de nia patro; ĉar vi estas filo de alia patrino. 3 Tiam Jiftaĥ forkuris de siaj fratoj kaj ekloĝis en la lando Tob. Kaj kolektiĝis al Jiftaĥ sentaŭgaj homoj kaj eliradis kun li. 4 Post kelka tempo ekmilitis la Amonidoj kontraŭ Izrael. 5 Kaj kiam la Amonidoj militis kontraŭ Izrael, la plejaĝuloj de Gilead iris, por preni Jiftaĥon el la lando Tob. 6 Kaj ili diris al Jiftaĥ: Iru kaj estu nia kondukanto, kaj ni batalos kontraŭ la Amonidoj. 7 Kaj Jiftaĥ diris al la plejaĝuloj de Gilead: Vi malamas ja min, kaj vi forpelis min el la domo de mia patro; kial do vi nun venis al mi, kiam vi estas en mizero? 8 Kaj la plejaĝuloj de Gilead diris al Jiftaĥ: Pro tio ni nun revenas al vi, ke vi iru kun ni, kaj ni batalos kontraŭ la Amonidoj, kaj vi estos ĉe ni estro de ĉiuj loĝantoj de Gilead. 9 Kaj Jiftaĥ diris al la plejaĝuloj de Gilead: Se vi revenigas min, por batali kontraŭ la Amonidoj, kaj la Eternulo transdonos ilin al mi, ĉu tiam mi estos via estro? 10 Kaj la plejaĝuloj de Gilead diris al Jiftaĥ: La Eternulo estu aŭskultanto inter ni, ke ni faros konforme al viaj vortoj. 11 Tiam Jiftaĥ iris kun la plejaĝuloj de Gilead, kaj la popolo faris lin super si estro kaj kondukanto, kaj Jiftaĥ eldiris ĉiujn siajn vortojn antaŭ la Eternulo en Micpa. 12 Jiftaĥ sendis senditojn al la reĝo de la Amonidoj, por diri: Kio estas inter mi kaj vi, ke vi venis al mi, por militi kontraŭ mia lando? 13 Kaj la reĝo de la Amonidoj diris al la senditoj de Jiftaĥ: Pro tio, ke Izrael prenis mian landon, kiam li iris el Egiptujo, de Arnon ĝis Jabok kaj ĝis Jordan; nun redonu ĝin al mi en paco. 14 Tiam Jiftaĥ duan fojon sendis senditojn al la reĝo de la Amonidoj, 15 kaj dirigis al li: Tiel diris Jiftaĥ: Izrael ne prenis landon de Moab, nek landon de la Amonidoj; 16 ĉar irante el Egiptujo, Izrael iris tra la dezerto ĝis la Ruĝa Maro kaj venis al Kadeŝ; 17 kaj tiam Izrael sendis senditojn al la reĝo de Edom, por diri: Permesu al mi trairi vian landon; sed la reĝo de Edom ne konsentis; ankaŭ al la reĝo de Moab estis sendite, sed li ne konsentis; tial Izrael restis en Kadeŝ; 18 kaj li iris tra la dezerto kaj ĉirkaŭis la landon de Edom kaj la landon de Moab kaj venis de oriento al la lando de Moab kaj stariĝis tendare transe de Arnon, sed ne eniris en la limojn de Moab, ĉar Arnon estas la limo de Moab. 19 Kaj Izrael sendis senditojn al Siĥon, reĝo de la Amoridoj, reĝo de Ĥeŝbon, kaj Izrael diris al li: Permesu al ni trairi vian landon ĝis mia loko; 20 sed Siĥon ne volis, ke Izrael trairu liajn limojn; kaj Siĥon kolektis sian tutan popolon, kaj ili stariĝis tendare en Jahac kaj batalis kontraŭ Izrael. 21 Kaj la Eternulo, Dio de Izrael, transdonis Siĥonon kaj lian tutan popolon en la manojn de Izrael, kiu venkobatis ilin; kaj Izrael ekposedis la tutan landon de la Amoridoj, kiuj loĝis en tiu lando. 22 Kaj ili ekposedis la tutan regionon de la Amoridoj, de Arnon ĝis Jabok kaj de la dezerto ĝis Jordan. 23 Tiamaniere la Eternulo, Dio de Izrael, forpelis la Amoridojn de antaŭ Lia popolo Izrael; kaj vi volas preni ĝian posedaĵon? 24 Tion, kion posedigas al vi Kemoŝ, via dio, tion posedu; sed ĉiun, kiun la Eternulo, nia Dio, forpelis de antaŭ ni, tiun ni heredos. 25 Ĉu vi estas pli bona ol Balak, filo de Cipor kaj reĝo de Moab? ĉu tiu malpacis kun Izrael aŭ militis kontraŭ li? 26 De la tempo, kiam Izrael ekloĝis en Ĥeŝbon kaj en ĝiaj dependaĵoj kaj en Aroer kaj en ĝiaj dependaĵoj, kaj en ĉiuj urboj, kiuj estas apud Arnon, pasis jam tricent jaroj; kial vi ne forprenis ilin en tiu tempo? 27 Mi ne pekis kontraŭ vi, kaj vi faras al mi malbonon, militante kontraŭ mi. La Eternulo, la Juĝanto, juĝu nun inter la Izraelidoj kaj la Amonidoj. 28 Sed la reĝo de Amon ne atentis la vortojn de Jiftaĥ, kiujn ĉi tiu sendis al li. 29 Kaj venis sur Jiftaĥon la spirito de la Eternulo, kaj li trapasis Gileadon kaj la regionon de Manase, kaj li trairis Micpan Gileadan, kaj de Micpa Gileada li iris al la Amonidoj. 30 Kaj Jiftaĥ faris sanktan promeson al la Eternulo, kaj diris: Se Vi transdonos la Amonidojn en miajn manojn, 31 tiam tiu, kiu eliros el la pordo de mia domo renkonte al mi, kiam mi feliĉe revenos de la Amonidoj — tiu apartenu

al la Eternulo, kaj mi oferos lin kiel bruloferon. 32 Kaj
Jiftaĥ venis al la Amonidoj, por batali kontraŭ ili; kaj
la Eternulo transdonis ilin en liajn manojn. 33 Kaj li
venkobatis ilin de Aroer ĝis Minit, dudek urbojn, kaj
ĝis Abel-Keramim — tio estis tre granda venkobato;
kaj la Amonidoj humiliĝis antaŭ la Izraelidoj. 34 Kaj
Jiftaĥ venis al Micpa, al sia domo, kaj jen lia filino
eliras renkonte al li kun tamburinoj kaj danco; kaj ŝi
estis lia sola infano; krom ŝi li havis neniun filon nek
filinon. 35 Kiam li ekvidis ŝin, li disŝiris siajn vestojn,
kaj diris: Ho ve, mia filino! kiel forte vi min klinis, vi
min malĝojigis! mi malfermis mian buŝon antaŭ la
Eternulo, kaj mi ne povas repreni la faron. 36 Kaj ŝi
diris al li: Mia patro! vi malfermis vian buŝon antaŭ
la Eternulo; agu do kun mi tiel, kiel diris via buŝo,
post kiam la Eternulo faris al vi venĝon kontraŭ viaj
malamikoj, kontraŭ la Amonidoj. 37 Kaj ŝi diris al sia
patro: Faru por mi jenon: lasu min for por du monatoj,
kaj mi iros, mi iros sur la montojn kaj priploros mian
virgecon, mi kune kun miaj amikinoj. 38 Kaj li diris:
Iru; kaj li forsendis ŝin por du monatoj. Kaj ŝi iris
kune kun siaj amikinoj kaj priploris sian virgecon
sur la montoj. 39 Kaj kiam pasis la du monatoj, ŝi
revenis al sia patro, kaj li plenumis sur ŝi sian sanktan
promeson, kiun li faris; kaj ŝi ne ekkonis viron. Kaj
fariĝis moro en Izrael, 40 ke ĉiujare la filinoj de Izrael
iras priplori la filinon de Jiftaĥ, la Gileadano, dum
kvar tagoj en jaro.

12 Kaj kolektiĝis la Efraimidoj kaj iris norden,
kaj diris al Jiftaĥ: Kial vi iris militi kontraŭ la
Amonidoj, kaj nin ne vokis, ke ni iru kun vi? vian
domon kune kun vi ni forbruligos per fajro. 2 Kaj
Jiftaĥ diris al ili: Mi kaj mia popolo havis grandan
disputon kun la Amonidoj; mi kriis al vi, sed vi ne
savis min el ilia mano. 3 Kiam mi vidis, ke vi ne savas,
mi elmetis al risko mian animon kaj iris kontraŭ la
Amonidojn, kaj la Eternulo transdonis ilin en miajn
manojn. Kial do vi venis hodiaŭ al mi, por malpaci
kontraŭ mi? 4 Kaj Jiftaĥ kolektis ĉiujn loĝantojn de
Gilead kaj batalis kontraŭ la Efraimidoj. Kaj la loĝantoj
de Gilead venkobatis la Efraimidojn; ĉar ĉi tiuj diris:
Vi estas forkurintoj el Efraim, Gilead estas ja meze de
Efraim kaj meze de Manase. 5 Kaj la Gileadanoj baris
al la Efraimidoj la transirejojn de Jordan. Kaj kiam iu
el la forkurantaj Efraimidoj diris: Mi volas transiri,
tiam la Gileadanoj diris al li: Ĉu vi estas Efraimido? Se
li diris: Ne, 6 tiam ili diris al li: Diru: Ŝibolet; li diris:
Sibolet, ĉar li ne povis elparoli ĝuste; tiam ili kaptis
lin kaj buĉis lin ĉe la transirejo de Jordan. Kaj en tiu
tempo falis el la Efraimidoj kvardek du mil. 7 Kaj
Jiftaĥ estis juĝisto de Izrael dum ses jaroj. Kaj mortis
Jiftaĥ, la Gileadano, kaj oni enterigis lin en la urboj de
Gilead. 8 Kaj post li estis juĝisto de Izrael Ibcan el
Bet-Leĥem. 9 Li havis tridek filojn, kaj tridek filinojn
li edzinigis eksteren, kaj tridek filinojn li prenis el
ekstere por siaj filoj. Kaj li estis juĝisto de Izrael dum
sep jaroj. 10 Kaj Ibcan mortis, kaj oni enterigis lin en
Bet-Leĥem. 11 Kaj post li estis juĝisto de Izrael Elon,
Zebulunido, kaj li estis juĝisto de Izrael dum dek jaroj.
12 Kaj mortis Elon, la Zebulunido, kaj oni enterigis lin
en Ajalon, en la lando de Zebulun. 13 Kaj post li estis
juĝisto de Izrael Abdon, filo de Hilel, Piratonano. 14 Li
havis kvardek filojn kaj tridek nepojn, kiuj rajdadis
sur sepdek junaj azenoj. Kaj li estis juĝisto de Izrael
dum ok jaroj. 15 Kaj mortis Abdon, filo de Hilel, la
Piratonano, kaj oni enterigis lin en Piraton, en la
lando de Efraim, sur la monto de la Amalekidoj.

13 Kaj la Izraelidoj denove faris malbonon antaŭ la
okuloj de la Eternulo; kaj la Eternulo transdonis
ilin en la manojn de la Filiŝtoj por kvardek jaroj. 2 Kaj
estis iu homo el Corea, el la tribo de Dan, kies nomo
estis Manoaĥ; lia edzino estis senfrukta kaj ne naskis.
3 Kaj aperis anĝelo de la Eternulo al la virino, kaj diris
al ŝi: Jen vi estas senfrukta kaj ne naskas; tamen vi
gravediĝos kaj naskos filon. 4 Sed nun gardu vin, kaj
ne trinku vinon nek ebriigaĵon, kaj manĝu nenion
malpuran; 5 ĉar jen vi gravediĝos kaj naskos filon; kaj
razilo ne devas tuŝi lian kapon, ĉar konsekrita al Dio
estos la knabo de el la ventro; kaj li komencos savadi
Izraelon el la manoj de la Filiŝtoj. 6 Kaj la virino iris,
kaj diris al sia edzo jene: Dia homo venis al mi, kaj
lia aspekto estis kiel la aspekto de anĝelo de Dio, tre
respektinda; kaj mi ne demandis lin, de kie li estas,
kaj sian nomon li ne diris al mi. 7 Kaj li diris al mi:
Jen vi gravediĝos kaj naskos filon; kaj nun ne trinku
vinon nek ebriigaĵon, kaj manĝu nenion malpuran;
ĉar konsekrita al Dio estos la knabo de el la ventro ĝis
la tago de lia morto. 8 Tiam Manoaĥ ekpreĝis al la
Eternulo, kaj diris: Mi petas Vin, ho mia Sinjoro: la Dia
homo, kiun Vi sendis, venu denove al ni, kaj li instruu
nin, kiel ni devas agi kun la naskota knabo. 9 Kaj Dio
aŭskultis la voĉon de Manoaĥ; kaj la anĝelo de Dio
venis denove al la virino, kiam ŝi estis sur la kampo;

kaj Manoaĥ, ŝia edzo, ne estis kun ŝi. 10 La virino
rapide kuris kaj sciigis sian edzon, kaj diris al li: Jen
aperis al mi la homo, kiu venis al mi en tiu tago. 11 Kaj
Manoaĥ leviĝis kaj iris post sia edzino kaj venis al la
homo, kaj diris al li: Ĉu vi estas tiu homo, kiu parolis al
la virino? Kaj tiu diris: Mi. 12 Kaj Manoaĥ diris: Se viaj
vortoj plenumiĝos, tiam kiaj devas esti la reguloj pri
la knabo kaj liaj agoj? 13 Kaj la anĝelo de la Eternulo
diris al Manoaĥ: Kontraŭ ĉio, pri kio mi parolis al la
virino, ŝi sin gardu; 14 nenion el tio, kio devenas el
vinberbranĉo, ŝi manĝu, vinon aŭ ebriigaĵon ŝi ne
trinku, kaj nenion malpuran ŝi manĝu; ĉion, kion mi
ordonis al ŝi, ŝi plenumu. 15 Kaj Manoaĥ diris al la
anĝelo de la Eternulo: Permesu, ke ni retenu vin, kaj
ni pretigos por vi kapridon. 16 Sed la anĝelo de la
Eternulo diris al Manoaĥ: Kvankam vi retenos min,
mi tamen ne manĝos vian panon; sed se vi volas fari
bruloferon, faru ĝin al la Eternulo. Ĉar Manoaĥ ne
sciis, ke tio estas anĝelo de la Eternulo. 17 Kaj Manoaĥ
diris al la anĝelo de la Eternulo: Kia estas via nomo?
ke ni povu honori vin, kiam plenumiĝos via vorto.
18 Sed la anĝelo de la Eternulo diris al li: Por kio vi
demandas pri mia nomo? ĝi estas neordinara. 19 Kaj
Manoaĥ prenis kapridon kaj farunoferon kaj oferlevis
tion sur roko al la Eternulo. Kaj Li faris miraklon, kaj
Manoaĥ kaj lia edzino tion vidis: 20 kiam la flamo
leviĝis de la altaro al la ĉielo, tiam la anĝelo de la
Eternulo leviĝis en la flamo de la altaro. Kaj Manoaĥ
kaj lia edzino tion vidis, kaj ili ĵetis sin vizaĝaltere.
21 Kaj la anĝelo de la Eternulo ne montris sin plu al
Manoaĥ kaj al lia edzino. Tiam Manoaĥ konvinkiĝis,
ke tio estis anĝelo de la Eternulo. 22 Kaj Manoaĥ
diris al sia edzino: Ni certe mortos, ĉar ni vidis Dion.
23 Sed lia edzino diris al li: Se la Eternulo dezirus
mortigi nin, Li ne akceptus el niaj manoj bruloferon
kaj farunoferon, kaj ne montrus al ni ĉion tion, kaj
nun Li ne aŭdigus al ni tion, kion Li aŭdigis. 24 Kaj la
virino naskis filon kaj donis al li la nomon Ŝimŝon.
Kaj la knabo kreskis, kaj la Eternulo lin benis. 25 Kaj
la spirito de la Eternulo komencis ekscitadi lin en la
Tendaro de Dan, inter Corea kaj Eŝtaol.

**14** Ŝimŝon iris en Timnan, kaj ekvidis en Timna
virinon el la filinoj de la Filiŝtoj. 2 Kaj li iris kaj
sciigis tion al sia patro kaj al sia patrino, kaj diris: Mi
vidis en Timna virinon el la filinoj de la Filiŝtoj; nun
prenu ŝin al mi kiel edzinon. 3 Kaj lia patro kaj lia
patrino diris al li: Ĉu ne troviĝas virino inter la filinoj
de viaj fratoj kaj en nia tuta popolo, ke vi iras preni
edzinon el la necirkumciditaj Filiŝtoj? Sed Ŝimŝon
diris al sia patro: Ŝin prenu por mi, ĉar ŝi plaĉas al
mi. 4 Kaj lia patro kaj lia patrino ne sciis, ke tio estas
de la Eternulo, ĉar Li serĉis pretekston kontraŭ la
Filiŝtoj; en tiu tempo la Filiŝtoj regis super Izrael. 5
Kaj Ŝimŝon kun sia patro kaj kun sia patrino iris en
Timnan; kiam ili venis al la vinberĝardenoj de Timna,
juna leono blekegante venis renkonte al li. 6 Kaj venis
sur lin la spirito de la Eternulo, kaj li disŝiris lin, kiel
oni disŝiras kapridon, kvankam li nenion havis en sia
mano. Kaj li ne diris al siaj gepatroj, kion li faris. 7
Kaj li venis kaj parolis kun la virino, kaj ŝi plaĉis al
Ŝimŝon. 8 Post kelka tempo li iris denove, por preni
ŝin, kaj li devojiĝis, por vidi la kadavron de la leono;
kaj jen svarmamaso da abeloj estas en la kadavro de
la leono, kaj ankaŭ mielo. 9 Kaj li prenis ĝin en siajn
manojn kaj iris, manĝante dum la irado; kaj li iris al
siaj gepatroj, kaj donis al ili, kaj ili manĝis; sed li ne
diris al ili, ke el la kadavro de la leono li prenis la
mielon. 10 Kaj lia patro venis al la virino, kaj Ŝimŝon
faris tie festenon, kiel ordinare faras la junuloj. 11
Kiam ili ekvidis lin, ili donis al li tridek kompanianojn,
ke ili estu kun li. 12 Kaj Ŝimŝon diris al ili: Mi proponos
al vi enigmon; se vi divenos ĝin al mi dum la sep tagoj
de la festeno kaj trafos, tiam mi donos al vi tridek
ĉemizojn kaj tridek kompletojn da vestoj; 13 sed se
vi ne povas diveni al mi, tiam vi donos al mi tridek
ĉemizojn kaj tridek kompletojn da vestoj. Kaj ili diris
al li: Proponu vian enigmon, kaj ni aŭskultos. 14 Kaj
li diris al ili: El manĝantaĵo devenis manĝataĵo, Kaj
el fortaĵo devenis dolĉaĵo. Kaj ili ne povis solvi la
enigmon dum tri tagoj. 15 En la sepa tago ili diris al la
edzino de Ŝimŝon: Admonu vian edzon, ke li solvu al
ni la enigmon; alie ni forbruligos per fajro vin kaj la
domon de via patro. Ĉu por senhavigi nin vi invitis
nin ĉi tien? 16 Tiam la edzino de Ŝimŝon ekploris
antaŭ li, kaj diris: Vi nur malamas min, sed ne amas;
vi proponis enigmon al la filoj de mia popolo, kaj al
mi vi ne diris ĝian solvon. Kaj li diris al ŝi: Jen al miaj
gepatroj mi ne diris la solvon, kaj ĉu al vi mi ĝin diru?
17 Kaj ŝi ploris antaŭ li dum la sep tagoj, kiujn daŭris
ĉe ili la festeno; en la sepa tago li diris al ŝi la solvon,
ĉar ŝi tre insistis. Kaj ŝi diris la solvon de la enigmo al
la filoj de ŝia popolo. 18 Kaj la urbanoj diris al li en la
sepa tago, antaŭ la subiro de la suno: Kio estas pli

dolĉa ol mielo? kaj kio estas pli forta ol leono? Kaj li
diris al ili: Se vi ne plugus per mia bovidino, Vi ne
trovus la solvon de mia enigmo. 19 Kaj venis sur lin
la spirito de la Eternulo, kaj li iris en Aŝkelonon kaj
mortigis tie tridek homojn kaj prenis iliajn vestojn kaj
donis la kompletojn de iliaj vestoj al la solvintoj de
la enigmo. Sed ekflamis lia kolero, kaj li foriris en la
domon de sia patro. 20 Kaj la edzino de Ŝimŝon fariĝis
edzino de lia festena kompaniulo, kiu kompaniis al li.

15 Post kelka tempo, en la tempo de rikoltado de
tritiko, Ŝimŝon vizitis sian edzinon, alportante
kapridon, kaj diris: Mi envenos al mia edzino en la
internan ĉambron. Sed ŝia patro ne permesis al li
eniri. 2 Kaj ŝia patro diris: Mi pensis, ke vi ekmalamis
ŝin, kaj mi donis ŝin al via amiko. Jen ŝia pli juna
fratino estas ja pli bela ol ŝi; ŝi fariĝu via, anstataŭ
tiu. 3 Sed Ŝimŝon diris al ili: Ĉi tiun fojon mi estos
senkulpa antaŭ la Filiŝtoj, se mi faros al ili malbonon.
4 Kaj Ŝimŝon iris, kaj kaptis tricent vulpojn kaj prenis
torĉojn, kaj turnis voston al vosto kaj alligis po unu
torĉo meze inter ĉiuj du vostoj. 5 Kaj li ekbruligis per
fajro la torĉojn kaj pelis ilin sur la grenkampojn de
la Filiŝtoj kaj forbruligis la garbojn kaj la ankoraŭ
ne rikoltitan grenon kaj la vinberĝardenojn kaj la
olivarbojn. 6 Kaj la Filiŝtoj diris: Kiu tion faris? Kaj
oni respondis: Ŝimŝon, bofilo de la Timnaano; ĉar ĉi
tiu prenis lian edzinon kaj fordonis ŝin al lia amiko.
Kaj la Filiŝtoj iris kaj forbruligis per fajro ŝin kaj ŝian
patron. 7 Tiam Ŝimŝon diris al ili: Se vi agas tiel, tiam
mi ne ĉesos, antaŭ ol mi faros venĝon kontraŭ vi. 8
Kaj li forte batis al ili la krurojn kaj la lumbojn; poste
li iris kaj ekloĝis en la fendego de la roko Etam. 9
Tiam la Filiŝtoj iris kaj stariĝis tendare en la regiono
de Jehuda kaj etendiĝis ĝis Leĥi. 10 Kaj la Jehudaidoj
diris: Pro kio vi eliris kontraŭ nin? Kaj ili respondis: Ni
venis, por ligi Ŝimŝonon, por agi kun li, kiel li agis kun
ni. 11 Tiam iris tri mil homoj el Jehuda al la fendego
de la roko Etam, kaj diris al Ŝimŝon: Ĉu vi ne scias,
ke la Filiŝtoj regas super ni? kion do vi faris al ni?
Kaj li diris al ili: Kiel ili agis kun mi, tiel mi agis kun
ili. 12 Kaj ili diris al li: Ni venis, por ligi vin, por doni
vin en la manojn de la Filiŝtoj. Tiam Ŝimŝon diris al
ili: Ĵuru al mi, ke vi ne mortigos min. 13 Kaj ili diris
al li jene: Ne; ni nur ligos vin kaj transdonos vin en
iliajn manojn, sed certe ni ne mortigos vin. Kaj ili
ligis lin per du novaj ŝnuroj kaj elkondukis lin el la
roko. 14 Kiam li venis al Leĥi, la Filiŝtoj ĝojkriante
iris renkonte al li. Sed venis sur lin la spirito de la
Eternulo, kaj la ŝnuroj, kiuj estis sur liaj brakoj, fariĝis
kiel lino, bruligita de fajro, kaj liaj katenoj disfalis de
liaj manoj. 15 Kaj li trovis freŝan makzelon de azeno,
kaj li etendis sian manon kaj prenis ĝin kaj mortigis
per ĝi mil homojn. 16 Kaj Ŝimŝon diris: Per makzelo
de azeno grandegan amason, Per makzelo de azeno
mi mortigis mil homojn. 17 Kiam li finis paroli, li
forĵetis el sia mano la makzelon; kaj li donis al tiu
loko la nomon Ramat-Leĥi. 18 Kaj li eksentis grandan
soifon, kaj li ekvokis al la Eternulo, kaj diris: Vi faris
per la mano de Via sklavo tiun grandan savon; kaj
nun mi devas morti de soifo kaj fali en la manojn
de la necirkumciditoj! 19 Tiam Dio fendis kavon, kiu
estis en Leĥi, kaj eliris el ĝi akvo; kaj li trinkis, kaj lia
spirito revenis, kaj li reviviĝis. Tial ĝi ricevis la nomon
ĝis la nuna tago: Fonto de la Vokanto en Leĥi. 20 Kaj li
estis juĝisto de Izrael en la tempo de la Filiŝtoj dum
dudek jaroj.

16 Ŝimŝon iris en Gazan kaj vidis tie malĉastulinon
kaj eniris al ŝi. 2 Al la Gazaanoj oni diris: Ŝimŝon
venis ĉi tien; kaj ili ĉirkaŭis lin kaj spione atendis lin
dum la tuta nokto ĉe la pordego de la urbo, kaj staris
senbrue dum la tuta nokto, dirante: Antaŭ la mateniĝo
ni lin mortigos. 3 Ŝimŝon kuŝis ĝis noktomezo; je
noktomezo li leviĝis kaj kaptis la pordojn de la urba
pordego kune kun ambaŭ fostoj kaj levis ilin kune kun
la riglilo kaj metis sur siajn ŝultrojn, kaj forportis ilin
sur la supron de la monto, kiu estas antaŭ Ĥebron. 4
Post tio li ekamis virinon en la valo Sorek; ŝia nomo
estis Delila. 5 Kaj venis al ŝi la estroj de la Filiŝtoj,
kaj diris al ŝi: Allogu lin, kaj vidu, en kio konsistas lia
granda forto, kaj per kio ni povus fortosuperi lin, ke ni
ligu lin kaj humiligu lin; tiam ni donos al vi ĉiu po mil
kaj cent arĝentaj moneroj. 6 Kaj Delila diris al Ŝimŝon:
Diru al mi, mi petas, en kio konsistas via granda forto,
kaj per kio oni povas ligi vin, por humiligi vin. 7 Kaj
Ŝimŝon diris al ŝi: Se oni ligos min per sep freŝaj ne
sekiĝintaj ŝnuroj, tiam mi senfortiĝos kaj fariĝos kiel
la aliaj homoj. 8 Tiam la estroj de la Filiŝtoj alportis al
ŝi sep freŝajn ne sekiĝintajn ŝnurojn, kaj ŝi ligis lin
per ili. 9 Kaj dum la embuskuloj sidis ĉe ŝi en alia
ĉambro, ŝi diris al li: Filiŝtoj iras al vi, Ŝimŝon! Tiam li
disŝiris la ŝnurojn, kiel oni disŝiras fadenon el stupo,
kiam fajro ĝin bruldifektis. Kaj oni ne sciiĝis pri lia
forto. 10 Kaj Delila diris al Ŝimŝon: Jen vi trompis

min kaj diris al mi mensogon; nun diru al mi, per
kio oni povas vin ligi. 11 Kaj li diris al ŝi: Se oni min
ligos per novaj ŝnuroj, kiuj ne estis uzitaj por laboro,
tiam mi senfortiĝos kaj fariĝos kiel la aliaj homoj.
12 Tiam Delila prenis novajn ŝnurojn kaj ligis lin per
ili, kaj diris al li: Filiŝtoj iras al vi, Ŝimŝon! Dume la
embuskuloj sidis en alia ĉambro. Kaj li deŝiris ilin de
siaj brakoj kiel fadenon. 13 Kaj Delila diris al Ŝimŝon:
Ĝis nun vi trompas min kaj diras al mi mensogojn;
diru al mi, per kio oni povas vin ligi. Kaj li diris al ŝi: Se
vi interteksos la sep buklojn de mia kapo kun ŝpinaĵo.
14 Kaj ŝi alfortikigis ilin per najlo, kaj diris al li: Filiŝtoj
iras al vi, Ŝimŝon! Kaj li vekiĝis el sia dormo kaj eltiris
la interteksan najlon kune kun la ŝpinaĵo. 15 Tiam ŝi
diris al li: Kial vi diras, ke vi amas min, dum tamen
via koro ne estas kun mi? jam tri fojojn vi trompis
min, kaj ne diris al mi, en kio konsistas via granda
forto. 16 Kaj ĉar ŝi tedadis lin per siaj vortoj ĉiutage
kaj turmentadis lin, lia animo morte laciĝis. 17 Kaj li
malkaŝis al ŝi sian tutan koron, kaj diris al ŝi: Tondilo
ne tuŝis mian kapon, ĉar mi estas konsekrita al Dio
de el la ventro de mia patrino. Se oni tondos miajn
harojn, tiam forlasos min mia forto, mi senfortiĝos
kaj fariĝos kiel la aliaj homoj. 18 Kiam Delila vidis, ke
li malkaŝis al ŝi sian tutan koron, ŝi sendis kaj vokigis
la estrojn de la Filiŝtoj, dirante: Venu ĉi tiun fojon, ĉar
li malkaŝis al mi sian tutan koron. Kaj venis al ŝi la
estroj de la Filiŝtoj kaj alportis la arĝenton en siaj
manoj. 19 Kaj ŝi endormigis lin sur siaj genuoj, kaj
alvokis homon, kaj detondigis la sep buklojn de lia
kapo. Kaj ŝi komencis humiligadi lin, kaj lia forto lin
forlasis. 20 Kaj ŝi diris: Filiŝtoj iras al vi, Ŝimŝon! Li
vekiĝis de sia dormo, kaj diris: Mi eliros, kiel ĉiufoje,
kaj mi vigliĝos; sed li ne sciis, ke la Eternulo forlasis
lin. 21 Kaj la Filiŝtoj kaptis lin kaj elpikis liajn okulojn,
kaj venigis lin en Gazan kaj ligis lin per kupraj ĉenoj;
kaj li devis mueli en la malliberejo. 22 Dume la haroj
de lia kapo komencis rekreski post la fortondo. 23
La estroj de la Filiŝtoj kunvenis, por alporti grandan
oferon al sia dio Dagon kaj por festeni, kaj ili diris:
Nia dio transdonis en niajn manojn nian malamikon
Ŝimŝon. 24 Kaj la popolo vidis lin, kaj gloris sian dion,
dirante: Nia dio transdonis en niajn manojn nian
malamikon kaj la ruiniganton de nia lando kaj la
mortiginton de multaj el ni. 25 Kiam ilia koro gajiĝis,
ili diris: Voku Ŝimŝonon, ke li amuzu nin. Kaj oni vokis
Ŝimŝonon el la malliberejo, kaj li faris amuzon al ili,
kaj oni starigis lin inter la kolonoj. 26 Kaj Ŝimŝon diris
al la junulo, kiu kondukis lin je la mano: Lasu min, ke
mi palpu la kolonojn, sur kiuj la domo staras, kaj mi
apogos min al ili. 27 Kaj la domo estis plena de viroj
kaj virinoj, kaj tie estis ĉiuj estroj de la Filiŝtoj; kaj sur
la tegmento estis ĉirkaŭ tri mil viroj kaj virinoj, kiuj
rigardis la amuzadon de Ŝimŝon. 28 Kaj Ŝimŝon vokis
al la Eternulo, kaj diris: Mia Sinjoro, ho Eternulo,
mi petas, rememoru min kaj fortigu min nur ĉi tiun
fojon, ho Dio, por ke mi faru al la Filiŝtoj venĝon per
unu fojo pro miaj du okuloj. 29 Kaj Ŝimŝon kaptis la du
mezajn kolonojn, sur kiuj staris la domo, kaj apogis
sin al ili, al unu per sia dekstra mano kaj al la dua per
sia maldekstra mano. 30 Kaj Ŝimŝon diris: Mortu mia
animo kune kun la Filiŝtoj! Kaj li ekpremis forte; kaj
falis la domo sur la estrojn, kaj sur la tutan popolon,
kiu estis en ĝi. Kaj la nombro de la mortintoj, kiujn li
mortigis ĉe sia morto, estis pli granda, ol la nombro
de tiuj, kiujn li mortigis dum sia vivo. 31 Kaj venis
liaj fratoj kaj la tuta domo de lia patro kaj prenis lin,
kaj iris kaj enterigis lin inter Corea kaj Eŝtaol, en la
tombo de lia patro Manoaĥ. Li estis juĝisto de Izrael
dum dudek jaroj.

17 Estis homo sur la monto de Efraim; lia nomo
estis Miĥa. 2 Li diris al sia patrino: La mil kaj
cent arĝentaj moneroj, kiujn oni prenis de vi kaj pro
kiuj vi malbenis antaŭ miaj oreloj, jen la arĝento estas
ĉe mi; mi prenis ĝin. Kaj lia patrino diris: Mia filo
estu benata de la Eternulo. 3 Kaj li redonis la mil
kaj cent arĝentajn monerojn al sia patrino. Kaj lia
patrino diris: Mi dediĉis la arĝenton al la Eternulo el
mia mano por mia filo, por fari figuron kaj idolon;
nun mi redonas ĝin al vi. 4 Sed li redonis la arĝenton
al sia patrino. Lia patrino prenis ducent arĝentajn
monerojn kaj donis ilin al orfandisto, kaj li faris el tio
figuron kaj idolon, kiu restis en la domo de Miĥa. 5
Tiu homo Miĥa havis domon de dio; kaj li faris efodon
kaj domajn diojn, kaj konsekris unu el siaj filoj, ke li
estu por li pastro. 6 En tiu tempo ne ekzistis reĝo ĉe
Izrael; ĉiu faradis tion, kio plaĉis al li. 7 Estis junulo
el Bet-Leĥem de Jehuda, el familio de Jehudaidoj, li
estis Levido kaj loĝis tie. 8 Tiu homo iris el la urbo,
el Bet-Leĥem de Jehuda, por ekloĝi tie, kie li trovos
oportune. Kaj li venis dum sia vojirado sur la monton
de Efraim al la domo de Miĥa. 9 Kaj Miĥa diris al li:
De kie vi venas? Kaj tiu diris al li: Mi estas Levido el

Bet-Leĥem de Jehuda, kaj mi iras, por ekloĝi tie, kie
mi trovos oportune. 10 Tiam Miĥa diris al li: Restu ĉe
mi kaj estu por mi patro kaj pastro, kaj mi donados
al vi po dek arĝentaj moneroj ĉiujare kaj necesajn
vestojn kaj manĝaĵon. Kaj la Levido iris. 11 Kaj la
Levido konsentis resti ĉe tiu homo, kaj la junulo estis
por li kiel unu el liaj filoj. 12 Kaj Miĥa konsekris la
Levidon, kaj la junulo fariĝis por li pastro kaj loĝis en
la domo de Miĥa. 13 Kaj Miĥa diris: Nun mi scias, ke
la Eternulo bonfaros al mi, ĉar Levido fariĝis por mi
pastro.

**18** En tiu tempo ne ekzistis reĝo ĉe Izrael; kaj en tiu
tempo la tribo de Dan serĉis por si posedaĵon,
por ekloĝi, ĉar ĝis tiu tempo ili ne ricevis posedaĵon
inter la triboj de Izrael. 2 Kaj la Danidoj sendis kvin
homojn el sia tribo, el siaj reprezentantoj, virojn
batalkapablajn el Corea kaj Eŝtaol, por rigardi la
landon kaj esplori ĝin, kaj diris al ili: Iru, esploru la
landon. Kaj ili venis sur la monton de Efraim al la
domo de Miĥa kaj tranoktis tie. 3 Kiam ili estis kun
la domanoj de Miĥa, ili rekonis la voĉon de la juna
Levido, kaj eniris tien, kaj diris al li: Kiu venigis vin ĉi
tien? kaj kion vi faras ĉi tie? kaj kion vi bezonas ĉi tie?
4 Kaj li diris al ili: Tiel kaj tiel agis kun mi Miĥa, kaj li
dungis min, kaj mi fariĝis pastro por li. 5 Kaj ili diris al
li: Demandu, ni petas, Dion, por ke ni eksciu, ĉu estos
sukcesa nia vojo, kiun ni iras. 6 Kaj la pastro diris al
ili: Iru en paco; laŭ la Eternulo estas via vojo, kiun vi
iras. 7 Kaj tiuj kvin viroj ekiris kaj venis en Laiŝon,
kaj vidis la popolon, ke ĝi tie loĝas senzorge, laŭ la
maniero de la Cidonanoj, trankvile kaj fide, kaj neniu
per io ofendas ilin en la lando aŭ regas super ili, kaj
de la Cidonanoj ili estas malproksime kaj kun neniu
ili havas ian aferon. 8 Kaj ili venis al siaj fratoj en
Corean kaj Eŝtaolon; kaj iliaj fratoj diris al ili: Kion vi
raportos? 9 Kaj ili diris: Leviĝu, kaj ni iru kontraŭ ilin;
ĉar ni vidis, ke la lando estas tre bona; estu trankvilaj,
ne prokrastu iri kaj veni kaj ekposedi la landon. 10
Kiam vi venos, vi venos al popolo, kiu ne pensas pri
danĝero, kaj la lando estas vasta; Dio transdonas ĝin
en viajn manojn; tio estas loko, kie mankas nenio, kio
estas sur la tero. 11 Kaj elmoviĝis el tie el la tribo de
la Danidoj, el Corea kaj Eŝtaol, sescent viroj, zonitaj
per bataliloj. 12 Kaj ili iris, kaj stariĝis tendare en
Kirjat-Jearim, en la regiono de Jehuda. Tial oni ĝis
nun nomas tiun lokon Tendaro de Dan; ĝi estas post
Kirjat-Jearim. 13 Kaj ili iris de tie sur la monton de
Efraim kaj venis al la domo de Miĥa. 14 Kaj la kvin
viroj, kiuj iris, por esplorrigardi la landon Laiŝ, diris al
siaj fratoj: Ĉu vi scias, ke en ĉi tiuj domoj troviĝas
efodo kaj domaj dioj kaj figuro kaj idolo? pripensu do,
kion vi devas fari. 15 Kaj ili turniĝis tien kaj eniris en
la domon de la juna Levido, en la domon de Miĥa, kaj
salutis lin. 16 La sescent viroj el la Danidoj, zonitaj per
siaj bataliloj, staris antaŭ la pordego. 17 Kaj la kvin
viroj, kiuj iris, por esplorrigardi la landon, eniris tien
kaj prenis la figuron kaj la efodon kaj la domajn diojn
kaj la idolon. Dume la pastro staris antaŭ la pordego,
kun la sescent viroj, zonitaj per bataliloj. 18 Kiam tiuj
eniris en la domon de Miĥa, kaj prenis la figuron, la
efodon, la domajn diojn, kaj la idolon, la pastro diris
al ili: Kion vi faras? 19 Sed ili diris al li: Silentu, metu
vian manon sur vian buŝon; kaj iru kun ni kaj estu por
ni patro kaj pastro; ĉu pli bone estas por vi esti pastro
por la domo de unu homo, ol esti pastro por tribo kaj
gento en Izrael? 20 Kaj tio bone plaĉis al la pastro, kaj
li prenis la efodon kaj la domajn diojn kaj la figuron
kaj iris inter la popolon. 21 Kaj ili turniĝis kaj iris, kaj
sendis la infanojn kaj la brutojn kaj la pakaĵojn antaŭ
sin. 22 Kiam ili malproksimiĝis de la domo de Miĥa,
la homoj, kiuj estis en la domoj najbaraj de Miĥa,
kun krio kolektiĝis kaj kuris post la Danidoj. 23 Kaj
ili kriis al la Danidoj; kaj ĉi tiuj turnis siajn vizaĝojn,
kaj diris al Miĥa: Kio estas al vi, ke vi faras krion? 24
Kaj li diris: Miajn diojn, kiujn mi faris, vi forprenis,
kaj ankaŭ la pastron, kaj vi foriris; kaj kio ankoraŭ
estas al mi? kial do vi demandas, kio estas al mi? 25
Kaj la Danidoj diris al li: Ne aŭdigu vian voĉon antaŭ
ni, ĉar alie atakos vin koleraj homoj kaj vi pereigos
vian animon kaj la animon de via domo. 26 Kaj la
Danidoj foriris sian vojon. Kaj Miĥa vidis, ke ili estas
pli fortaj ol li; kaj li returniĝis kaj revenis en sian
domon. 27 Sed tiuj prenis tion, kion faris Miĥa, kaj la
pastron, kiu estis ĉe li; kaj ili venis en Laiŝon, kontraŭ
la popolon trankvilan kaj senzorgan, kaj venkobatis
ĝin per la glavo; kaj la urbon ili forbruligis per fajro.
28 Kaj estis neniu savanto, ĉar ĝi estis malproksime de
Cidon kaj ili havis neniajn aferojn kun iu, kaj ĝi estis
en la valo, kiu troviĝas apud Bet-Reĥob. Ili konstruis
la urbon kaj ekloĝis en ĝi. 29 Ili donis al la urbo la
nomon Dan, laŭ la nomo de sia patro, kiu naskiĝis de
Izrael; antaŭe la nomo de la urbo estis Laiŝ. 30 Kaj la
Danidoj starigis al si la figuron; kaj Jehonatan, filo de

Gerŝom, filo de Manase, li kaj liaj filoj estis pastroj
por la tribo de la Danidoj, ĝis la tago, kiam ili estis
forkaptitaj el la lando. 31 Kaj dum la tuta tempo, kiam
la domo de Dio estis en Ŝilo, ili havis ĉe si la idolon de
Miĥa, kiun li faris.

19 En tiu tempo, kiam ne ekzistis reĝo ĉe Izrael,
loĝis iu Levido sur la deklivo de la monto de
Efraim. Li prenis al si kromedzinon el Bet-Leĥem de
Jehuda. 2 Kaj lia kromedzino perfidis lin kaj foriris de
li en la domon de sia patro en Bet-Leĥem de Jehuda,
kaj ŝi restis tie kvar monatojn. 3 Kaj leviĝis ŝia edzo
kaj iris al ŝi, por paroli al ŝia koro, por revenigi ŝin;
kun li estis lia junulo kaj paro da azenoj. Kaj ŝi enirigis
lin en la domon de sia patro; kaj la patro de la juna
virino lin ekvidis kaj akceptis lin kun ĝojo. 4 Kaj
retenis lin lia bopatro, la patro de la juna virino, kaj li
restis ĉe li dum tri tagoj; kaj ili manĝis kaj trinkis kaj
tranoktis tie. 5 En la kvara tago ili leviĝis frue matene,
kaj li intencis foriri; sed la patro de la juna virino diris
al sia bofilo: Fortigu vian koron per peco da pano; kaj
poste vi iros. 6 Kaj ili restis, kaj ambaŭ kune manĝis
kaj trinkis. Kaj la patro de la juna virino diris al la
viro: Mi petas vin, tranoktu kaj ĝojigu vian koron.
7 La viro leviĝis, por foriri; sed lia bopatro insiste
petis lin, kaj li restis kaj tranoktis tie. 8 En la kvina
tago li leviĝis frue matene, por iri; sed la patro de la
juna virino diris: Fortigu, mi petas, vian koron, kaj ne
rapidu, ĝis finiĝos la tago. Kaj ili ambaŭ manĝis. 9
Kaj la viro leviĝis, por iri, li kaj lia kromedzino kaj lia
junulo. Sed lia bopatro, la patro de la juna virino, diris
al li: Jen finiĝis la tago kaj fariĝas vespero, tranoktu
do, mi petas; jen la tago finiĝis, tranoktu ĉi tie, ke
via koro faru al si ĝojon; morgaŭ frue vi leviĝos, por
iri vian vojon, kaj vi iros al via tendo. 10 Sed la viro
ne volis tranokti; li leviĝis kaj iris. Kaj li venis al la
ĉirkaŭaĵo de Jebus (tio estas Jerusalem); kun li estis
paro da ŝarĝitaj azenoj, kaj ankaŭ lia kromedzino. 11
Kiam ili estis antaŭ Jebus, la tago jam forte kliniĝis.
Kaj la junulo diris al sia sinjoro: Venu, ni eniru en
ĉi tiun urbon de la Jebusidoj, kaj ni tranoktu en ĝi.
12 Sed lia sinjoro diris al li: Ni ne eniros en urbon
de aligentuloj, kiuj ne estas el la Izraelidoj; ni iros
pluen, ĝis Gibea. 13 Kaj li diris al sia junulo: Iru, ke ni
alproksimiĝu al unu el la lokoj, kaj ni tranoktu en
Gibea aŭ en Rama. 14 Kaj ili iris pluen kaj iris; kaj la
suno subiris antaŭ ili apud Gibea, kiu apartenis al la
Benjamenidoj. 15 Kaj ili turniĝis tien, por eniri kaj
tranokti en Gibea. Kaj li eniris kaj sidiĝis sur la strato;
sed neniu invitis ilin en la domon, por tranokti. 16
Sed jen iu maljunulo venis vespere de sia laboro de
la kampo; li estis de la monto de Efraim kaj loĝis
tiutempe en Gibea; kaj la loĝantoj de tiu loko estis
Benjamenidoj. 17 Li levis siajn okulojn kaj ekvidis
la fremdan homon sur la strato de la urbo. Kaj la
maljunulo diris: Kien vi iras? kaj de kie vi venas? 18
Kaj tiu diris al li: Ni iras el Bet-Leĥem de Jehuda al la
deklivo de la monto de Efraim, de kie mi estas. Mi iris
al Bet-Leĥem de Jehuda, kaj nun mi iras al la domo de
la Eternulo; kaj neniu invitas min en la domon. 19
Ni havas pajlon kaj manĝaĵon por niaj azenoj, ankaŭ
panon kaj vinon mi havas por mi kaj por via sklavino,
kaj por la junulo, kiu estas kun viaj sklavoj; nenio
mankas al ni. 20 Kaj la maljunulo diris: Paco estu al
vi; ĉion, kio mankus al vi, mi prenas sur min; nur
ne tranoktu sur la strato. 21 Kaj li envenigis lin en
sian domon, kaj li donis manĝaĵon al la azenoj; kaj ili
lavis siajn piedojn kaj manĝis kaj trinkis. 22 Dum ili
ĝojigadis sian koron, jen la loĝantoj de la urbo, homoj
malmoralaj, ĉirkaŭis la domon, frapis je la pordo,
kaj diris al la maljuna domomastro jene: Elirigu la
homon, kiu venis en vian domon, ke ni lin ekkonu. 23
Tiam eliris al ili la domomastro, kaj diris al ili: Ne,
miaj fratoj, ne faru malbonon; ĉar tiu homo venis
en mian domon, ne faru tian malnoblaĵon. 24 Jen mi
havas filinon virgulinon, kaj li havas kromedzinon;
mi elirigos ilin, kaj vi malhonoru ilin, kaj faru al ili
tion, kio plaĉas al vi; sed kun ĉi tiu viro ne faru tian
abomenindaĵon. 25 Sed la homoj ne volis aŭskulti
lin. Tiam la viro prenis sian kromedzinon kaj elirigis
al ili sur la straton. Kaj ili ekkonis ŝin, kaj faris al si
amuzon kun ŝi dum la tuta nokto, ĝis la mateno; kaj
ili forliberigis ŝin, kiam leviĝis la matenruĝo. 26 Kaj la
virino venis antaŭ la mateniĝo, kaj falis antaŭ la pordo
de la domo de tiu homo, kie estis ŝia sinjoro; kaj ŝi
kuŝis, ĝis fariĝis lume. 27 Matene leviĝis ŝia sinjoro kaj
malfermis la pordon de la domo, kaj eliris, por iri sian
vojon; kaj jen li vidas, ke la virino, lia kromedzino,
kuŝas antaŭ la pordo de la domo, kaj ŝiaj manoj estas
sur la sojlo. 28 Kaj li diris al ŝi: Leviĝu, kaj ni iros. Sed
estis nenia respondo. Tiam li prenis ŝin sur la azenon,
leviĝis, kaj iris al sia loko. 29 Kiam li venis en sian
domon, li prenis tranĉilon, prenis sian kromedzinon
kaj distranĉis ŝin kun ŝiaj ostoj en dek du partojn kaj

dissendis tion en ĉiujn regionojn de Izrael. 30 Kaj ĉiu,
kiu tion vidis, diris: Ne estis kaj ne vidiĝis io simila de
post la tago, kiam la Izraelidoj eliris el la lando Egipta,
ĝis nun; atentu tion, konsiliĝu, kaj decidu.

20 Kaj eliris ĉiuj Izraelidoj, kaj kolektiĝis la tuta
komunumo kiel unu homo, de Dan ĝis Beer-Ŝeba,
kaj la lando Gilead, antaŭ la Eternulo en Micpa. 2
Kaj kunvenis la estroj de la tuta popolo, ĉiuj triboj
de Izrael, en la kunvenejon de la popolo de Dio,
kvarcent mil piedirantoj kapablaj eltiri glavon. 3 La
Benjamenidoj aŭdis, ke la Izraelidoj venis en Micpan.
Kaj la Izraelidoj diris: Diru, kiamaniere okazis tiu
malbonaĵo? 4 Tiam respondis la Levido, la edzo de
la mortigita virino, kaj diris: Mi venis en Gibean
de la Benjamenidoj, mi kun mia kromedzino, por
tranokti. 5 Kaj leviĝis kontraŭ min la loĝantoj de
Gibea, kaj ĉirkaŭis pro mi la domon nokte. Min ili
intencis mortigi, kaj mian kromedzinon ili turmentis
tiel, ke ŝi mortis. 6 Tiam mi prenis mian kromedzinon,
distranĉis ŝin kaj dissendis en ĉiujn regionojn de
Izrael; ĉar ili faris malĉastaĵon kaj malnoblaĵon en
Izrael. 7 Jen vi ĉiuj estas Izraelidoj; faru konsiliĝon kaj
decidon ĉi tie. 8 Kaj leviĝis la tuta popolo kiel unu
homo, kaj diris: Neniu el ni iros al sia tendo, kaj neniu
el ni revenos al sia domo; 9 sed jen estas, kion ni faros
al Gibea: ni lotos pri ĝi; 10 kaj ni prenos po dek homoj
el ĉiu cento, el ĉiuj triboj, po cent el mil kaj po mil el
dek mil, ke ili alportu manĝaĵon por la popolo, por
ke ĉi tiu iru en Gibean de la Benjamenidoj, kaj agu
kontraŭ ĝi konforme al la malnoblaĵo, kiun ĝi faris en
Izrael. 11 Kaj kolektiĝis kontraŭ la urbo ĉiuj Izraelidoj
unuanime, kiel unu homo. 12 Kaj la triboj de Izrael
sendis homojn al ĉiuj familioj de Benjamen, por diri:
Kio estas la malbonaĵo, kiu estas farita ĉe vi? 13 Eligu
do nun la kanajlajn homojn, kiuj estas en Gibea, kaj ni
mortigos ilin kaj ekstermos la malbonon el Izrael. Sed
la Benjamenidoj ne volis obei la voĉon de siaj fratoj,
la Izraelidoj. 14 Kaj la Benjamenidoj kolektiĝis el la
urboj en Gibea, por eliri milite kontraŭ la Izraelidojn.
15 Kaj la nombro de la Benjamenidoj el la urboj en tiu
tago estis dudek ses mil homoj pretaj eltiri glavon;
krom tio el la loĝantoj de Gibea estis la nombro de
sepcent homoj plej taŭgaj. 16 El tiu tuta popolo estis
sepcent homoj plej taŭgaj, maldekstruloj; ĉiu el ili
povis ĵeti ŝtonon kontraŭ haron, kaj ne maltrafi. 17
Kaj la nombro de la Izraelidoj, krom la Benjamenidoj,
estis kvarcent mil homoj pretaj eltiri glavon; ĉiuj ili
estis batalkapablaj. 18 Kaj ili leviĝis kaj iris en Bet-
Elon kaj demandis Dion, kaj la Izraelidoj diris: Kiu el ni
devas iri antaŭe milite kontraŭ la Benjamenidojn? Kaj
la Eternulo diris: Jehuda antaŭe. 19 Kaj la Izraelidoj
leviĝis matene kaj eksieĝis Gibean. 20 Kaj la Izraelidoj
eliris milite kontraŭ la Benjamenidojn, kaj la Izraelidoj
komencis batalon kontraŭ ili antaŭ Gibea. 21 Kaj eliris
la Benjamenidoj el Gibea kaj batis en tiu tago el la
Izraelidoj dudek du mil homojn sur la teron. 22 Sed
la popolo de la Izraelidoj ekscitis sian kuraĝon, kaj
denove komencis batalon sur la loko, kie ili batalis
en la unua tago. 23 Kaj la Izraelidoj iris kaj ploris
antaŭ la Eternulo ĝis la vespero, kaj demandis la
Eternulon, dirante: Ĉu ni devas plue alproksimiĝi
milite al la Benjamenidoj, niaj fratoj? Kaj la Eternulo
diris: Iru kontraŭ ilin. 24 Kaj la Izraelidoj alpaŝis al la
Benjamenidoj en la dua tago. 25 Kaj la Benjamenidoj
eliris al ili renkonte el Gibea en la dua tago kaj batis
el la Izraelidoj ankoraŭ dek ok mil homojn sur la
teron; ĉiuj ili estis eltirantoj de glavo. 26 Tiam ĉiuj
Izraelidoj kaj la tuta popolo iris kaj venis en Bet-Elon
kaj ploris kaj restis tie antaŭ la Eternulo kaj fastis
en tiu tago ĝis la vespero kaj alportis bruloferojn kaj
pacoferojn antaŭ la Eternulon. 27 Kaj la Izraelidoj
demandis la Eternulon (tie estis en tiu tempo la kesto
de interligo de Dio, 28 kaj Pineĥas, filo de Eleazar,
filo de Aaron, staris antaŭ ĝi en tiu tempo); kaj ili
diris: Ĉu ni devas plue elpaŝi batale kontraŭ niajn
fratojn la Benjamenidojn, aŭ ĉu ni devas ĉesi? Kaj
la Eternulo diris: Iru, ĉar morgaŭ Mi transdonos
ilin en viajn manojn. 29 Kaj la Izraelidoj aranĝis
embuskojn ĉirkaŭe de Gibea. 30 Kaj la Izraelidoj eliris
kontraŭ la Benjamenidojn en la tria tago kaj stariĝis
kontraŭ Gibea kiel antaŭe. 31 Kaj la Benjamenidoj
eliris kontraŭ la popolon, malproksimiĝis de la urbo,
kaj komencis batadi la popolon kiel en la antaŭaj
fojoj, sur la vojoj, el kiuj unu iras al Bet-El kaj la dua
al Gibea, kaj mortigis pli-malpli tridek homojn el la
Izraelidoj. 32 Kaj la Benjamenidoj diris al si: Ili falas
antaŭ ni kiel antaŭe. Kaj la Izraelidoj diris: Ni kuru,
por ke ni ellogu ilin el la urbo sur la vojon. 33 Kaj ĉiuj
Izraelidoj leviĝis de sia loko kaj stariĝis en Baal-Tamar.
Kaj la embuskuloj de la Izraelidoj ĵetis sin el sia loko,
el la kaverno Geba. 34 Kaj venis antaŭ Gibean dek mil
elektitaj viroj el la tuta Izrael, kaj estis kruela batalo;
kaj ili ne sciis, ke trafos ilin malbono. 35 Kaj la Eternulo

frapis la Benjamenidojn antaŭ la Izraelidoj; kaj la
Izraelidoj ekstermis en tiu tago el la Benjamenidoj
dudek kvin mil kaj cent homojn; ĉiuj ili estis eltirantoj
de glavo. 36 La Benjamenidoj vidis, ke tiuj estis frapitaj
kaj la Izraelidoj cedis la lokon al la Benjamenidoj; ĉar
ili fidis la embuskon, kiun ili aranĝis ĉe Gibea. 37 Kaj
la embuskuloj rapidis kaj ĵetis sin kontraŭ Gibean,
kaj la embuskuloj eniris kaj batis la tutan urbon per
glavo. 38 Estis interkonsentite inter la Izraelidoj kaj la
embuskuloj, ke ĉi tiuj suprenigos grandan kolonon
da fumo el la urbo. 39 Kiam la Izraelidoj retiriĝis
dum la batalo, kaj la Benjamenidoj komencis mortigi
Izraelidojn kaj mortigis pli-malpli tridek homojn,
kaj diris: Ili falas antaŭ ni kiel en la unua batalo: 40
tiam komencis leviĝadi el la urbo kolono da fumo.
La Benjamenidoj ekrigardis returne, kaj ili ekvidis,
ke el la tuta urbo leviĝas flamoj al la ĉielo. 41 Kaj
la Izraelidoj returniĝis, kaj la Benjamenidoj terure
konsterniĝis; ĉar ili vidis, ke malfeliĉo ilin trafis.
42 Kaj ili turniĝis antaŭ la Izraelidoj, al la vojo, kiu
kondukas al la dezerto; sed la batalo postkuris ilin,
kaj la elirintoj el la urboj ekstermis ilin dumvoje, 43
ĉirkaŭis la Benjamenidojn, persekutis ilin ĝis Menuĥa,
kaj piedpremis ilin ĝis la orienta flanko de Gibea. 44
Kaj falis el la Benjamenidoj dek ok mil homoj; ĉiuj ili
estis fortaj militistoj. 45 Kaj ili sin turnis kaj ekkuris al
la dezerto, al la roko Rimon; kaj oni batis el ili sur
la vojo kvin mil homojn, kaj oni postkuris ilin ĝis
Gidom kaj batis el ili ankoraŭ du mil homojn. 46 La
nombro de ĉiuj falintoj el la Benjamenidoj en tiu tago
estis dudek kvin mil homoj eltirantoj de glavo; ĉiuj ili
estis fortaj militistoj. 47 Kaj ili sin turnis kaj forkuris
en la dezerton, al la roko Rimon, sescent homoj; kaj
ili restis ĉe la roko Rimon kvar monatojn. 48 Sed la
Izraelidoj reiris al la Benjamenidoj, kaj mortigis per
glavo la urbanojn, la brutojn, kaj ĉion, kion ili trovis;
kaj ĉiujn urbojn, kiujn ili renkontis, ili forbruligis per
fajro.

21 Kaj la Izraelidoj ĵuris en Micpa, dirante: Neniu el
ni donos sian filinon edzinige al Benjamenido. 2
Kaj la popolo venis en Bet-Elon, kaj restis tie ĝis la
vespero antaŭ Dio, kaj levis sian voĉon kaj forte ploris,
3 kaj diris: Kial, ho Eternulo, Dio de Izrael, fariĝis tio
en Izrael, ke malaperis nun el Izrael unu tribo? 4 La
morgaŭan tagon la popolo leviĝis frue kaj konstruis
tie altaron kaj oferis bruloferojn kaj pacoferojn. 5 Kaj
la Izraelidoj diris: Kiu homo el ĉiuj triboj de Izrael
ne venis kun la komunumo al la Eternulo? Ĉar estis
farita granda ĵuro pri tiuj, kiuj ne venis al la Eternulo
en Micpan, ke ili estos mortigitaj. 6 Kaj la Izraelidoj
ekpentis pri siaj fratoj la Benjamenidoj, kaj diris:
Forhakita estas hodiaŭ unu tribo el Izrael! 7 kion ni
faros al ili, al la restintoj, koncerne edzinojn? ni ĵuris
ja per la Eternulo, ke ni ne donos al ili edzinojn el niaj
filinoj. 8 Kaj ili diris: Kiu homo el la triboj de Izrael ne
venis al la Eternulo en Micpan? Kaj tiam montriĝis, ke
en la tendaron al la komunumo venis neniu el Jabeŝ
en Gilead. 9 Kaj oni reviziis la popolon, kaj montriĝis,
ke tie estas neniu el la loĝantoj de Jabeŝ en Gilead. 10
Tiam la komunumo sendis tien dek du mil homojn el
la viroj batalkapablaj, kaj ordonis al ili jene: Iru kaj
mortigu per glavo la loĝantojn de Jabeŝ en Gilead,
ankaŭ la virinojn kaj infanojn. 11 Kaj tiel agu: ĉiun
virseksulon, kaj ĉiun virinon, kiu ekkonis kuŝejon
de viro, ekstermu. 12 Kaj ili trovis inter la loĝantoj
de Jabeŝ en Gilead kvarcent junajn virgulinojn, kiuj
ne ekkonis kuŝejon de viro; kaj ili venigis ilin en la
tendaron en Ŝilon, kiu estas en la lando Kanaana.
13 Kaj la tuta komunumo sendis, por paroli kun la
Benjamenidoj, kiuj estis ĉe la roko Rimon, kaj anonci
al ili pacon. 14 Tiam la Benjamenidoj revenis, kaj oni
donis al ili la virinojn, kiuj restis vivaj el la virinoj de
Jabeŝ en Gilead; sed ne estis sufiĉe por ili. 15 Kaj la
popolo bedaŭris pri Benjamen, ĉar la Eternulo faris
fendon en la triboj de Izrael. 16 Kaj la plejaĝuloj de la
komunumo diris: Kion ni faru al la restintoj koncerne
edzinojn? ekstermitaj estas ja la virinoj de Benjamen.
17 Kaj ili diris: La restintoj el la Benjamenidoj bezonas
ja heredontojn, por ke ne malaperu tribo el Izrael;
18 kaj ni ne povas doni al ili edzinojn el niaj filinoj,
ĉar la Izraelidoj ĵuris, dirante: Malbenita estu tiu, kiu
donos edzinon al Benjamenido. 19 Sed ili diris: Jen
ĉiujare estas festo de la Eternulo en Ŝilo, kiu estas
norde de Bet-El, oriente de la vojo, kiu kondukas
de Bet-El al Ŝeĥem, kaj sude de Lebona. 20 Kaj ili
ordonis al la Benjamenidoj jene: Iru kaj faru insidon
en la vinberĝardenoj; 21 kaj kiam vi vidos, ke la
knabinoj de Ŝilo eliras, por danci en rondoj, tiam
eliru el la vinberĝardenoj kaj kaptu al vi ĉiu edzinon
el la knabinoj de Ŝilo kaj iru en la landon de la
Benjamenidoj. 22 Kaj se venos iliaj patroj aŭ fratoj
kun plendo al ni, ni diros al ili: Pardonu nin pro ili;
ĉar ni ne prenis por ĉiu edzinon en la milito, kaj vi ne

donis al ili; tial vi estas nun senkulpaj. 23 Kaj tiel agis
la Benjamenidoj, kaj prenis edzinojn laŭ sia nombro
el la dancrondoj, rabinte ilin; kaj ili iris kaj revenis al
sia posedaĵo kaj konstruis urbojn kaj ekloĝis en ili. 24
Kaj en la sama tempo disiris de tie la Izraelidoj, ĉiu al
sia tribo kaj al sia familio, kaj ĉiu foriris de tie al sia
posedaĵo. 25 En tiu tempo ne ekzistis reĝo ĉe Izrael;
ĉiu faradis tion, kio plaĉis al li.

# Rut

**1** En la tempo, kiam regis la juĝistoj, iam malsato
okazis en la lando; kaj foriris viro el Bet-Leĥem
en Judujo, por pasloĝi en la lando de Moab; li kaj lia
edzino kaj liaj du filoj. **2** La nomo de la viro estis
Elimeleĥ, kaj la nomo de lia edzino estis Naomi, kaj la
nomoj de liaj du filoj estis Maĥlon kaj Kiljon, Efratanoj
el Bet-Leĥem en Judujo. Kaj ili venis sur la kampojn
de Moab kaj restis tie. **3** Elimeleĥ, la edzo de Naomi,
mortis; kaj restis ŝi kun siaj du filoj. **4** Ambaŭ edziĝis
kun Moabidinoj; la nomo de unu estis Orpa, kaj la
nomo de la dua estis Rut; kaj ili loĝis tie ĉirkaŭ dek
jaroj. **5** Sed mortis ankaŭ ambaŭ, Maĥlon kaj Kiljon;
kaj restis nur la virino sola, senigita je sia edzo kaj siaj
du filoj. **6** Ŝi leviĝis kun siaj bofilinoj, por iri returne
el la lando de Moab; ĉar ŝi aŭdis en la lando de Moab,
ke la Eternulo rememoris Sian popolon, donante al ĝi
panon. **7** Ŝi eliris el la loko, kie ŝi loĝis, kun siaj du
bofilinoj; kaj ili iris sur la vojo, por ke ili revenu al la
lando de Jehuda. **8** Naomi diris al siaj du bofilinoj:
Iru, kaj revenu ĉiu el vi al la domo de sia patrino; la
Eternulo favoru vin tiel same, kiel vi estis favorkoraj
al la mortintoj kaj al mi; **9** la Eternulo favoru vin, ke
vi trovu ripozon, ĉiu el vi en domo de sia edzo. Ŝi
kisis ilin, kaj ili levis sian voĉon kaj ploris. **10** Kaj ili
diris al ŝi: Ni volas iri kun vi al via popolo. **11** Naomi
respondis: Iru returne, miaj filinoj; kial do vi irus
kun mi? Ĉu ankoraŭ ekzistas filoj en mia utero, ke vi
edziniĝu kun ili? **12** Revenu, miaj filinoj, foriru; ĉar
mi jam estas tro maljuna por edziniĝi kun viro. Eĉ
se mi dirus, ke mi havas ankoraŭ esperon, eĉ se mi
jam havus edzon hodiaŭ nokte, kaj eĉ se mi naskus
filojn: **13** ĉu pri ili vi esperu, ĝis ili plenaĝiĝos? ĉu
por ili vi atendu, ne edziniĝante kun viro? Ne, miaj
filinoj; estas tre maldolĉe al mi pro vi, ĉar la mano de
la Eternulo afliktis min. **14** Sed ili levis sian voĉon kaj
ploris plue. Kaj Orpa kisis sian bopatrinon, sed Rut
aliĝis al ŝi. **15** Kaj ĉi tiu diris: Jen via bofratino reiris al
sia gento kaj al siaj dioj; iru vi ankaŭ returne post via
bofratino. **16** Sed Rut diris: Ne petegu min, ke mi vin
forlasu, aŭ ke mi returnu min kaj ĉesu sekvi vin; ĉar
kien vi iros, mi ankaŭ iros, kaj kie vi noktos, mi ankaŭ
noktos; via popolo ankaŭ estos mia popolo, kaj via
Dio estos mia Dio. **17** Sur la loko, kie vi mortos, mi
ankaŭ mortos, kaj tie oni min enterigos. La Eternulo
faru al mi tion kaj pli, se io krom la morto disigos
min de vi. **18** Kiam Naomi vidis, ke ŝi firme decidis iri
kun ŝi, tiam ŝi ĉesis disputi kun ŝi. **19** Kaj ili ambaŭ
iradis, ĝis ili alvenis en Bet-Leĥemon. Kaj kiam ili
eniris en Bet-Leĥemon, la tuta loĝantaro de la urbo
ekbruis pri ili, dirante: Ĉu tio estas Naomi? **20** Kaj
ŝi respondis al ili: Ne nomu min Naomi, nomu min
Mara; ĉar la Plejpotenculo faris al mi maldolĉegon; **21**
kun pleneco mi foriris, sed la Eternulo revenigis min
malplena; kial do vi nomus min Naomi, konsiderante,
ke la Eternulo atestis kontraŭ mi kaj la Plejpotenculo
afliktis min? **22** Tiel Naomi revenis, kaj kun ŝi ankaŭ
Rut, la Moabidino, ŝia bofilino, kiu revenis el la lando
de Moab; kaj ili venis en Bet-Leĥemon je la komenco
de la rikolto de hordeo.

**2** Naomi havis parencon de ŝia edzo, viron eminentan,
el la familio de Elimeleĥ; lia nomo estis Boaz. **2**
Kaj la Moabidino Rut diris al Naomi: Mi iros sur la
kampon, kaj mi kolektos spikojn post tiu, ĉe kiu mi
trovos favoron. Kaj ŝi respondis: Iru, mia filino. **3** Kaj
ŝi foriris, kaj venis kaj kolektis post la rikoltistoj. Kaj
okazis, ke la parcelo de la kampo apartenis al Boaz,
kiu estis el la familio de Elimeleĥ. **4** Kaj jen Boaz venis
el Bet-Leĥem, kaj li salutis la rikoltistojn: La Eternulo
estu kun vi! Kaj ili respondis al li: La Eternulo vin
benu! **5** Kaj Boaz demandis sian serviston, la estron
de la rikoltistoj: Kiu estas ĉi tiu knabino? **6** Kaj la
servisto, la estro de la rikoltistoj, respondis kaj diris:
Ŝi estas Moaba knabino, kiu revenis kun Naomi el la
lando de Moab; **7** ŝi diris: Permesu al mi, ke mi sekvu
kaj kolektu apud la garboj, post la rikoltistoj; kaj ŝi
restis ĉi tie de la mateno ĝis nun; ŝi ĵus sidiĝis en la
dometo por iomete da tempo. **8** Kaj Boaz diris al Rut:
Ĉu vi aŭdas, mia filino? ne iru kolekti sur la kampo
de iu fremdulo, kaj ankaŭ ne foriru de ĉi tie, sed
restu ĉi tie kun miaj junulinoj; **9** rimarku la kampon,
kie ili rikoltas, kaj sekvu ilin; mi jam ordonis al la
servistoj, ke ili ne malhelpu vin; kaj kiam vi soifos,
iru al la vazaro, kaj trinku el tio, el kio la servistaro
ĉerpas. **10** Ŝi ĵetis sin vizaĝaltere, kaj diris al li: Kial do
mi trovis favoron en viaj okuloj, ke vi atentas min,
kvankam mi estas fremdulino? **11** Kaj Boaz respondis
kaj diris al ŝi: Jam estas rakontita al mi ĉio, kion vi
faris al via bopatrino post la morto de via edzo: ke vi
forlasis viajn gepatrojn kaj vian naskiĝlandon, kaj iris
al popolo, kiun vi ne konis hieraŭ nek antaŭhieraŭ. **12**
La Eternulo rekompencu vin pro ĉi tiu faro, kaj via

rekompenco estu plena de la Eternulo, Dio de Izrael,
sub kies flugiloj vi serĉis protekton. 13 Kaj ŝi diris:
Estus sufiĉe, ke mi trovu favoron en viaj okuloj, mia
sinjoro, ĉar vi konsolis min kaj parolis amike al via
sklavino, kvankam mi ne valoras esti egala al iu el viaj
sklavinoj. 14 Kaj en la horo de la manĝado Boaz diris
al ŝi: Alproksimiĝu kaj manĝu kune, vi ankaŭ povas
trempi vian panon en la vinagro. Kaj ŝi sidiĝis ĉe la
flanko de la rikoltistoj; kaj ili metis antaŭ ŝin rostitajn
grajnojn, kaj ŝi manĝis kaj satiĝis, kaj ankaŭ havis
restaĵon. 15 Kiam ŝi leviĝis, por kolekti, Boaz ordonis
al siaj servistoj, dirante: Eĉ inter la garboj lasu ŝin
kolekti, kaj ne hontigu ŝin; 16 kaj vi ankaŭ ŝajnigu
al ŝi, ke vi postlasis la malgrandajn garbetojn, kaj vi
permesu al ŝi, ke ŝi kolektu ilin, kaj ne riproĉu ŝin. 17
Kaj ŝi kolektadis sur la kampo ĝis la vespero, kaj ŝi
draŝis tion, kion ŝi kolektis, kaj tio estis ĉirkaŭ efo da
hordeo. 18 Kaj ŝi levis tion, kaj iris en la urbon; kaj ŝia
bopatrino vidis tion, kion ŝi kolektis; ŝi ankaŭ elprenis,
kaj donis al ŝi la restaĵon, kiun ŝi posedis de post
sia satiĝo. 19 Ŝia bopatrino diris al ŝi: Kie vi kolektis
hodiaŭ? kaj kie vi amasigis? estu benata tiu, kiu vin
tiel favore akceptis! Ŝi rakontis al sia bopatrino, kie
ŝi laboris, kaj ŝi diris: La nomo de la viro, ĉe kiu mi
laboris hodiaŭ, estas Boaz. 20 Tiam Naomi diris al sia
bofilino: Li estu benata de la Eternulo, kiu ne fortiris
Sian favoron for de la vivantoj kaj de la mortintoj.
Kaj Naomi plue diris al ŝi: La viro estas nia parenco,
unu el niaj savantoj. 21 Kaj Rut, la Moabidino, diris:
Li ankaŭ diris al mi: Restu kune kun miaj servistoj,
ĝis ili finos la tutan rikolton, kiu apartenas al mi. 22
Naomi respondis al sia bofilino Rut: Estos bone por vi,
mia filino, ke vi ĉiam iru kun liaj junulinoj, ĉar eble
oni hontigus vin, se vi irus aliloken. 23 Kaj ŝi kuniĝis
kun la junulinoj de Boaz, por kolekti, ĝis la fino de la
rikolto de hordeo kaj de la rikolto de tritiko; kaj poste
ŝi loĝis kune kun sia bopatrino.

3 Naomi, ŝia bopatrino, diris al ŝi: Mia bofilino,
mia celo estas, ke mi trovu por vi ripozejon, kie
pliboniĝos via stato. 2 Vidu nun, nia parenco Boaz,
kun kies junulinoj vi kuniĝis, ventumas hordeon
dum ĉi tiu nokto en la draŝejo; 3 lavu do vin kaj
oleu vin kaj vestu vin per viaj plej bonaj vestoj, kaj
iru en la draŝejon; ne vidigu vin al la viro, antaŭ
ol li finos manĝi kaj trinki; 4 kaj kiam li kuŝiĝos,
rimarku la lokon, kie li kuŝas, iru tien, malkovru la
piedparton de la kuŝejo, kaj kuŝiĝu; kaj li diros al
vi, kion vi devos fari. 5 Rut respondis al ŝi: Kion vi
diras al mi, tion mi faros. 6 Kaj ŝi iris en la draŝejon,
kaj faris tion, kion ŝia bopatrino ordonis al ŝi. 7
Kiam Boaz estis manĝinta kaj trinkinta kaj gajiĝis,
li iris por kuŝiĝi malantaŭ grenamaso; kaj ŝi venis
kviete, kaj malkovris la piedparton de la kuŝejo, kaj
kuŝiĝis. 8 En la noktomezo la viro ektimiĝis; li turnis
sin, kaj li ekvidis, ke virino kuŝas ĉe liaj piedoj. 9 Li
demandis: Kiu vi estas? Kaj ŝi respondis: Mi estas
Rut, via servistino; etendu vian mantelon sur vian
servistinon, ĉar vi estas savanto. 10 Kaj li diris: Estu
benata de la Eternulo, mia filino; via lasta piaĵo estas
pli granda, ol la unua, ĉar vi ne volas iri kun la junuloj,
ĉu ili estas malriĉaj, ĉu riĉaj. 11 Kaj nun, mia filino,
ne timu; mi faros al vi ĉion, kion vi petos de mi; ĉar
estas sciate en la tuta urbo de mia popolo, ke vi estas
bravulino. 12 Kaj nun, kvankam vere mi estas parenco,
tamen ekzistas parenco pli proksima ol mi. 13 Restu
ĉi tie la nokton; kaj kiam venos la mateno, se la alia
parenco perfekte elaĉetos vin, lasu elaĉeti vin; sed se
li ne volos vin elaĉeti, tiam mi vin elaĉetos, kiel la
Eternulo vivas. Kuŝu ĝis la tagiĝo. 14 Kaj ŝi kuŝis ĉe
liaj piedoj ĝis la tagiĝo; sed ŝi leviĝis, antaŭ ol oni
povis rekoni unu la alian. Kaj li diris: Mi ne volas, ke
iu sciiĝu, ke ĉi tiu virino estis en mia draŝejo. 15 Kaj li
diris: Alportu la ŝalon, kiun vi havas sur vi, kaj tenu
ĝin. Ŝi ĝin tenis, kaj li enmezuris en ĝin ses mezurilojn
da hordeo kaj metis ĝin sur ŝin, kaj ŝi iris en la urbon.
16 Kiam ŝi alvenis al sia bopatrino, ĉi tiu demandis:
Kiel la afero iras ĉe vi, mia filino? Kaj ŝi rakontis al ŝi
ĉion, kion la viro faris al ŝi. 17 Kaj ŝi diris plue: La
ses mezurilojn da hordeo li ankaŭ donis al mi; ĉar li
diris al mi: Ne revenu malplena al via bopatrino. 18
Kaj ĉi tiu diris: Restu, mia filino, ĝis vi sciiĝos, kiel
la afero finiĝis; ĉar tiu homo ne ripozos, ĝis la afero
estos finita hodiaŭ.

4 Boaz iris al la pordego de la urbo kaj sidiĝis tie. Kaj
jen preterpasas la parenco, pri kiu Boaz parolis. Kaj
li diris: Alproksimiĝu kaj sidiĝu ĉi tie, vi, tia-tia. Tiu
alproksimiĝis kaj sidiĝis. 2 Kaj Boaz prenis dek virojn
el la plejaĝuloj de la urbo, kaj diris: Sidiĝu ĉi tie. Kaj
ili sidiĝis. 3 Kaj li diris al la parenco: Tiun parcelon
de la kampo, kiu apartenis al nia frato Elimeleĥ,
vendas Naomi, kiu revenis el la lando de Moab; 4
kaj mi decidis sciigi vin, dirante: Aĉetu en la ĉeesto

de la loĝantoj kaj en la ĉeesto de la plejaĝuloj de
mia popolo. Se vi volas elaĉeti, aĉetu nun; sed se vi
ne volas elaĉeti, diru al mi, por ke mi sciu; ĉar ne
ekzistas iu alia por aĉeti, krom vi, kaj mi estas via
postproksimulo. Tiu diris: Mi volas elaĉeti. 5 Tiam
Boaz diris: Samtempe, kiam vi aĉetos la kampon el la
mano de Naomi kaj de Rut, la Moabidino, edzino de la
mortinto, vi ankaŭ prenos sur vin la devon restarigi
la nomon de la mortinto al lia heredaĵo. 6 Kaj la
parenco diris: Mi ne povas elaĉeti al mi, por ke mi ne
pereigu mian propran heredaĵon; elaĉetu al vi mian
aĉetotaĵon, ĉar vere mi ne povas elaĉeti. 7 Sed de la
antikva tempo ekzistis kutimo en Izrael, pri elaĉetado
kaj ŝanĝado, por firmigi ĉion: oni detiras sian ŝuon
kaj donas ĝin al sia proksimulo; kaj tio estas la atesto
en Izrael. 8 La parenco diris al Boaz: Elaĉetu al vi; kaj
li detiris sian ŝuon. 9 Kaj Boaz diris al la plejaĝuloj
kaj al la popolamaso: Hodiaŭ vi estas atestantoj, ke
mi aĉetis el la mano de Naomi ĉion, kio apartenis al
Elimeleĥ kaj al Kiljon kaj Maĥlon; 10 kaj ankaŭ Ruton,
la Moabidinon, la edzinon de Maĥlon, mi akiris al mi
kiel edzinon, por restarigi la nomon de la mortinto
al lia heredaĵo, por ke la nomo de la mortinto ne
estingiĝu inter liaj fratoj kaj ĉe la pordego de lia loko;
vi estas atestantoj hodiaŭ. 11 Kaj la tuta ĉeestantaro,
kiu troviĝis ĉe la pordego, kiel ankaŭ la plejaĝuloj,
respondis: Ni estas atestantoj; la Eternulo faru, ke
la virino, kiu envenas en vian domon, estu simila
al Raĥel kaj Lea, kiuj ambaŭ starigis la domon de
Izrael, kaj vi estu sukcesplena en Efrata kaj akiru
bonan nomon en Bet-Leĥem; 12 kaj via domo estu
sukcesplena, simile al la domo de Perec, kiun naskis
Tamar al Jehuda, el la idaro, kiun la Eternulo donos al
vi de tiu junulino. 13 Kaj Boaz prenis Ruton, kaj ŝi
fariĝis lia edzino; kaj li envenis al ŝi, kaj la Eternulo
donis al ŝi gravedecon, kaj ŝi naskis filon. 14 Kaj la
virinoj diris al Naomi: Benata estu la Eternulo, kiu
ne lasis vin sen parenco hodiaŭ, kaj li estu fama en
Izrael; 15 kaj li estu al vi ĝojiganto, kaj prizorganto de
via maljuneco; ĉar via bofilino, kiu amas vin kaj kiu
estas al vi pli bona ol sep filoj, naskis lin. 16 Kaj Naomi
prenis la infanon kaj metis ĝin sur sian bruston kaj
fariĝis ĝia vartistino. 17 Kaj la najbarinoj donis al li
nomon, dirante: Filo naskiĝis al Naomi; kaj ili nomis
lin Obed. Li estas la patro de Jiŝaj, patro de David. 18
Kaj jen estas la generacioj de Perec: al Perec naskiĝis
Ĥecron, 19 al Ĥecron naskiĝis Ram, al Ram naskiĝis
Aminadab, 20 al Aminadab naskiĝis Naĥŝon, al Naĥŝon
naskiĝis Salma, 21 al Salma naskiĝis Boaz, al Boaz
naskiĝis Obed, 22 al Obed naskiĝis Jiŝaj, kaj al Jiŝaj
naskiĝis David.

# 1 Samuel

1 Estis unu viro el Ramataim-Cofim, de la monto
de Efraim; lia nomo estis Elkana, filo de Jeroĥam,
filo de Elihu, filo de Toĥu, filo de Cuf, Efratano. 2 Li
havis du edzinojn; la nomo de unu estis Ĥana, kaj la
nomo de la dua estis Penina. Penina havis infanojn,
sed Ĥana ne havis infanojn. 3 Tiu viro ĉiujare iradis el
sia urbo, por adorkliniĝi kaj fari oferon al la Eternulo
Cebaot en Ŝilo; kaj tie Ĥofni kaj Pineĥas, du filoj de Eli,
estis pastroj de la Eternulo. 4 Unu tagon Elkana faris
oferon, kaj li donis al sia edzino Penina kaj al ĉiuj ŝiaj
filoj kaj filinoj partojn; 5 kaj al Ĥana li kun malĝojo
donis unu parton, ĉar Ĥanan li amis, sed la Eternulo
ŝlosis ŝian uteron. 6 Kaj ŝia konkurantino afliktis ŝin
kaj tre incitis ŝin kaŭze de tio, ke la Eternulo ŝlosis
ŝian uteron. 7 Tiel estis farate ĉiujare; kiam ŝi iradis al
la domo de la Eternulo, la konkurantino tiel incitadis
ŝin, ke ŝi ploris kaj ne manĝis. 8 Kaj ŝia edzo Elkana
diris al ŝi: Ĥana, kial vi ploras? kaj kial vi ne manĝas?
kaj kial tiel afliktiĝas via koro? ĉu mi ne estas por vi pli
bona ol dek filoj? 9 Kaj Ĥana leviĝis, manĝinte en Ŝilo
kaj trinkinte. Kaj la pastro Eli sidis sur seĝo ĉe la fosto
de la templo de la Eternulo. 10 Kaj ŝi estis tre malĝoja,
kaj preĝis al la Eternulo, kaj forte ploris. 11 Kaj ŝi faris
sanktan promeson, kaj diris: Ho Eternulo Cebaot! se
Vi rigardos la suferon de Via sklavino kaj rememoros
min kaj ne forgesos Vian sklavinon kaj donos al Via
sklavino idon virseksan, tiam mi fordonos lin al la
Eternulo por la tuta tempo de lia vivo, kaj tondilo
ne tuŝos lian kapon. 12 Dum ŝi longe preĝis antaŭ
la Eternulo, Eli atente rigardis ŝian buŝon. 13 Ĥana
parolis en sia koro; nur ŝiaj lipoj moviĝadis, sed ŝian
voĉon oni ne aŭdis; tial Eli pensis, ke ŝi estas ebria. 14
Kaj Eli diris al ŝi: Kiel longe vi restos ebria? forigu vian
vinon el vi. 15 Sed Ĥana respondis kaj diris: Ne, mia
sinjoro, mi estas virino kun malĝoja koro; vinon aŭ
ebriigaĵon mi ne trinkis, mi nur elverŝas mian animon
antaŭ la Eternulo. 16 Ne opiniu pri via sklavino, ke ŝi
estas virino malmorala; pro mia granda malĝojo kaj
sufero mi parolis ĝis nun. 17 Tiam Eli respondis kaj
diris: Iru en paco, kaj la Dio de Izrael plenumos vian
peton, kiun vi petis de Li. 18 Kaj ŝi diris: Via sklavino
akiru vian favoron. Kaj la virino iris sian vojon, kaj ŝi
manĝis, kaj ŝia vizaĝo ne estis plu malgaja. 19 Kaj ili
leviĝis frue matene kaj adorkliniĝis antaŭ la Eternulo,
kaj reiris kaj venis al sia domo en Rama. Kaj Elkana
ekkonis sian edzinon Ĥana, kaj la Eternulo rememoris
ŝin. 20 Post kelka tempo Ĥana gravediĝis kaj naskis
filon, kaj ŝi donis al li la nomon Samuel, ĉar: De la
Eternulo mi lin elpetis. 21 La viro Elkana kun sia tuta
domanaro iris, por oferi al la Eternulo la ĉiujaran
oferon kaj sian promesitaĵon. 22 Sed Ĥana ne iris, sed
ŝi diris al sia edzo: Kiam la knabo estos demamigita,
tiam mi venigos lin, ke li aperu antaŭ la Eternulo kaj
restu tie por ĉiam. 23 Kaj ŝia edzo Elkana diris al ŝi:
Faru tion, kio plaĉas al vi; restu, ĝis vi demamigos lin;
nur la Eternulo plenumu Sian promeson. Kaj la virino
restis, kaj suĉigis sian infanon, ĝis ŝi demamigis lin.
24 Kaj post kiam ŝi demamigis lin, ŝi venigis lin kun si
kune kun tri bovoj kaj unu efo da faruno kaj felsako
da vino, kaj ŝi venigis lin en la domon de la Eternulo
en Ŝilo; kaj la knabo estis ankoraŭ juna. 25 Kaj oni
buĉis bovon kaj venigis la knabon al Eli. 26 Kaj ŝi diris:
Ho mia sinjoro! tiel certe, kiel vivas via animo, mia
sinjoro, mi estas tiu virino, kiu staris ĉi tie apud vi kaj
preĝis al la Eternulo. 27 Pri ĉi tiu knabo mi preĝis, kaj
la Eternulo plenumis al mi mian peton, pri kiu mi
petis Lin. 28 Tial mi fordonas lin al la Eternulo; por la
tuta tempo de sia vivo li estu fordonita al la Eternulo.
Kaj ili tie adorkliniĝis antaŭ la Eternulo.

2 Kaj Ĥana preĝis kaj diris: Ĝojas mia koro pri
la Eternulo, Mia korno altiĝis pro la Eternulo;
Larĝe malfermiĝis mia buŝo kontraŭ miaj malamikoj,
Ĉar mi ĝojas pro Via helpo. 2 Neniu estas tiel
sankta, kiel la Eternulo; Ĉar ekzistas neniu krom
Vi, Kaj nenia defendanto simila al nia Dio. 3 Ne
parolu plu fieraĵon; Malhumilaĵo ne eliru plu el via
buŝo; Ĉar la Eternulo estas Dio ĉioscianta, Kaj Li
starigis la aferojn. 4 La pafarko de la fortuloj estas
senvalorigata, Kaj la malfortuloj zoniĝas per forto. 5
Satuloj sin dungigas pro pano, Kaj malsatuloj jam ne
malsatas; Senfruktulino naskis sep, Kaj multinfanulino
senfortiĝis. 6 La Eternulo mortigas kaj vivigas,
Malsuprigas en Ŝeolon kaj suprigas. **(Sheol h7585)** 7
La Eternulo malriĉigas kaj riĉigas, Malaltigas kaj
altigas. 8 Li levas malriĉulon el polvo, El koto Li altigas
senhavulon, Por sidigi lin kun altranguloj, Kaj tronon
de gloro Li heredigas al li; Ĉar al la Eternulo apartenas
la fundamentoj de la tero, Kaj sur ili Li starigis la
mondon. 9 La piedojn de Siaj piuloj Li gardas, Kaj la
malvirtuloj pereas en mallumo; Ĉar ne per sia forto
potenciĝas la homo. 10 La Eternulo pereigas tiujn, kiuj

ribelas kontraŭ Li; El la ĉielo Li tondras kontraŭ ili. La
Eternulo juĝos la finojn de la tero, Kaj donos forton al
Sia reĝo, Kaj altigos la kornon de Sia sanktoleito. 11
Kaj Elkana iris en Raman, al sia domo; kaj la knabo
fariĝis servisto de la Eternulo apud la pastro Eli. 12 La
filoj de Eli estis malmoralaj; ili ne konis la Eternulon,
13 nek la devojn de pastroj koncerne la popolon. Se iu
buĉis oferon, tiam venadis knabo de la pastro dum la
kuirado de la viando, havante en sia mano tridentan
forkon, 14 kaj li enpuŝadis ĝin en la lavujon aŭ en la
kaldronon aŭ en la poton aŭ en la kaserolon, kaj ĉion,
kion trafis la forko, prenadis la pastro. Tiel ili agadis
kun ĉiuj Izraelidoj, kiuj venadis tien en Ŝilon. 15 Eĉ
antaŭ la oferbruligo de la sebo venadis knabo de la
pastro, kaj diradis al la alportanto de la ofero: Donu
viandon, por rosti por la pastro; li ne prenos de vi
viandon kuiritan, sed nur krudan. 16 Se la homo diris
al li: Antaŭe oni oferbruligu la sebon, kaj poste prenu
al vi, kion via animo deziras; tiam li diradis: Donu tuj,
alie mi prenos per forto. 17 La peko de la knaboj estis
tre granda antaŭ la Eternulo, ĉar la homoj malestimis
la oferdonon, faratan al la Eternulo. 18 Samuel estis
servisto antaŭ la Eternulo; la knabo estis zonita per
lina efodo. 19 Kaj malgrandan tunikon faradis al li lia
patrino, kaj alportadis al li ĉiujare, kiam ŝi venadis
kun sia edzo, por alporti la ĉiujaran oferon. 20 Kaj
Eli benadis Elkanan kaj lian edzinon, kaj diradis: La
Eternulo donu al vi idojn de ĉi tiu virino rekompence
pro la konsekrito, kiun vi konsekris al la Eternulo.
Kaj ili iradis al sia loko. 21 La Eternulo atentis Ĥanan,
kaj ŝi gravediĝis kaj naskis tri filojn kaj du filinojn;
kaj la knabo Samuel kreskis antaŭ la Eternulo. 22
Eli estis tre maljuna; li aŭdis ĉion, kiel agas liaj filoj
kun ĉiuj Izraelidoj, kaj ke ili kuŝas kun la virinoj,
kiuj kolektiĝas antaŭ la pordo de la tabernaklo de
kunveno. 23 Kaj li diris al ili: Kial vi faras tiajn agojn?
ĉar mi aŭdas pri viaj malbonaj agoj de ĉi tiu tuta
popolo. 24 Ne, miaj infanoj, ne bona estas la famo,
kiun mi aŭdas; vi devojigas la popolon de la Eternulo.
25 Se pekas homo kontraŭ homo, povas defendi lin
Dio; sed se homo pekas kontraŭ la Eternulo, tiam
kiu defendos lin? Sed ili ne aŭskultis la voĉon de sia
patro, ĉar la Eternulo decidis mortigi ilin. 26 Dume
la knabo Samuel ĉiam pli kreskis, kaj li plaĉis kiel
al la Eternulo, tiel ankaŭ al la homoj. 27 Kaj venis
homo de Dio al Eli, kaj diris al li: Tiel diras la Eternulo:
Mi montris Min ja al la domo de via patro, kiam ili
estis en Egiptujo, en la domo de Faraono; 28 kaj Mi
elektis lin el ĉiuj triboj de Izrael kiel pastron por Mi,
ke li oferu sur Mia altaro, ke li fumigu incenson, ke
li portu efodon antaŭ Mi; kaj Mi donis al la domo
de via patro ĉiujn fajroferojn de la Izraelidoj. 29 Kial
do vi piedpremas Mian buĉoferon kaj farunoferon,
kiujn Mi starigis por la loĝejo? vi honoras viajn filojn
pli ol Min, por grasigi vin per la unuaj partoj de ĉiuj
oferdonoj de Mia popolo Izrael. 30 Tial la Eternulo,
Dio de Izrael, diras: Mi diris, ke via domo kaj la domo
de via patro irados antaŭ Mi eterne; sed nun, diras la
Eternulo, Mi tion ne permesos; ĉar Miajn honorantojn
Mi honoros, kaj Miaj malestimantoj estos malaltigitaj.
31 Jen venos baldaŭ la tempo, kiam Mi rompos vian
brakon kaj la brakon de via patrodomo, ke ne estos
maljunulo en via domo; 32 kaj vi vidos konkuranton
en la loĝejo, dum ĉiuj bonoj, kiuj estos farataj al Izrael;
kaj neniam estos maljunulo en via domo. 33 Sed Mi
neniun ekstermos ĉe vi de antaŭ Mia altaro, por ke
viaj okuloj konsumiĝu kaj via animo turmentiĝu; ĉiu,
kiu naskiĝas en via domo, mortos en la vira aĝo. 34
Kaj jen estas por vi la pruvosigno, kiu plenumiĝos
sur viaj du filoj, sur Ĥofni kaj Pineĥas: en unu tago
ili ambaŭ mortos. 35 Kaj Mi starigos por Mi pastron
fidelan, kiu agados laŭ Mia koro kaj laŭ Mia animo;
kaj Mi konstruos al li domon fidindan, kaj li irados
ĉiam antaŭ Mia sanktoleito. 36 Kaj ĉiu, kiu restos el
via domo, venos kaj kliniĝos antaŭ li ĝis la tero pro
malgranda monero kaj pro bulo da pano, kaj diros: Mi
petas, lasu min aliĝi al ia el la pastraĵoj, por ke mi
povu manĝi pecon da pano.

3 La knabo Samuel servadis al la Eternulo antaŭ Eli;
kaj la vorto de la Eternulo estis grandpreza en tiu
tempo; ne aperadis ofte profetaj vizioj. 2 En tiu tempo
unu fojon Eli kuŝis sur sia loko (lia vidado komencis
malakriĝi, ke li ne povis vidi); 3 kaj la lucerno de
Dio ankoraŭ ne estingiĝis, kaj Samuel kuŝis en la
templo de la Eternulo, kie estis la kesto de Dio; 4 tiam
la Eternulo vokis Samuelon, kaj ĉi tiu diris: Jen mi
estas. 5 Kaj li kuris al Eli, kaj diris: Jen mi estas, kiel
vi vokis min. Sed tiu diris: Mi ne vokis; iru returne
kaj kuŝiĝu. Kaj li iris kaj kuŝiĝis. 6 Kaj la Eternulo
denove vokis Samuelon, kaj Samuel leviĝis kaj iris al
Eli, kaj diris: Jen mi estas, kiel vi vokis min. Sed tiu
diris: Mi ne vokis, mia filo; iru returne kaj kuŝiĝu. 7
Samuel ankoraŭ ne konis la Eternulon, kaj ankoraŭ ne

estis revelaciita al li la vorto de la Eternulo. **8** Kaj la
Eternulo denove vokis Samuelon la trian fojon; kaj
li leviĝis kaj iris al Eli, kaj diris: Jen mi estas, kiel vi
vokis min. Tiam Eli komprenis, ke la Eternulo vokas la
knabon. **9** Kaj Eli diris al Samuel: Iru, kuŝiĝu; kaj se vi
estos vokata, tiam diru: Parolu, ho Eternulo, ĉar Via
sklavo aŭskultas. Kaj Samuel iris kaj kuŝiĝis sur sia
loko. **10** Kaj venis la Eternulo kaj stariĝis, kaj vokis kiel
la antaŭajn fojojn: Samuel, Samuel! Kaj Samuel diris:
Parolu, ĉar Via sklavo aŭskultas. **11** Tiam la Eternulo
diris al Samuel: Jen Mi faros en Izrael tian faron, ke al
ĉiu, kiu tion aŭdos, eksonoros ambaŭ liaj oreloj. **12** En
tiu tago Mi plenumos super Eli ĉion, kion Mi diris pri
lia domo; Mi komencos kaj finos. **13** Mi sciigis al li,
ke Mi juĝos lian domon por ĉiam pro la krimo, ke li
sciis, ke liaj filoj venigas malbenon sur sin, kaj li ne
detenis ilin. **14** Kaj tial Mi ĵuris al la domo de Eli, ke
neniam pekliberiĝos la krimo de la domo de Eli per
buĉofero nek per farunofero. **15** Kaj Samuel kuŝis ĝis
la mateno; poste li malfermis la pordojn de la domo
de la Eternulo. Sed Samuel timis raporti pri la vizio al
Eli. **16** Kaj Eli vokis Samuelon, kaj diris: Samuel, mia
filo! Kaj ĉi tiu diris: Jen mi estas. **17** Kaj tiu diris: Kia
estas la afero, pri kiu Li parolis al vi? mi petas, ne
kaŝu antaŭ mi; tion kaj ankoraŭ pli faru al vi Dio, se vi
kaŝos antaŭ mi ion el ĉio, kion Li diris al vi. **18** Kaj
Samuel rakontis al li ĉion, kaj nenion kaŝis antaŭ li.
Kaj li diris: Li estas la Eternulo; Li faru tion, kio plaĉas
al Li. **19** Kaj Samuel kreskis, kaj la Eternulo estis kun
li; kaj neniun el Liaj vortoj li faligis sur la teron. **20**
Kaj eksciis la tuta Izrael, de Dan ĝis Beer-Ŝeba, ke
Samuel fariĝis fidinda profeto de la Eternulo. **21** Kaj la
Eternulo plue aperadis en Ŝilo, post kiam la Eternulo
revelaciis Sin al Samuel en Ŝilo per la parolo de la
Eternulo.

**4** Kaj Samuel parolis al la tuta Izrael. Kaj Izrael eliris
milite kontraŭ la Filiŝtojn, kaj stariĝis tendare apud
Eben-Ezer, kaj la Filiŝtoj stariĝis tendare apud Afek. **2**
Kaj la Filiŝtoj starigis siajn vicojn kontraŭ Izrael, kaj
la batalo vastiĝis, kaj Izrael estis venkobatita de la
Filiŝtoj, kaj ili mortigis sur la kampo de la batalo pli-
malpli kvar mil homojn. **3** Kaj la popolo venis en la
tendaron, kaj la plejaĝuloj de Izrael diris: Pro kio la
Eternulo frapis nin hodiaŭ antaŭ la Filiŝtoj? ni prenu
al ni el Ŝilo la keston de interligo de la Eternulo, por
ke ĝi venu inter nin kaj savu nin kontraŭ la manoj de
niaj malamikoj. **4** Kaj la popolo sendis en Ŝilon, kaj oni
alportis de tie la keston de interligo de la Eternulo
Cebaot, sidanta sur la keruboj; tie estis kun la kesto
de interligo de Dio la du filoj de Eli, Ĥofni kaj Pineĥas.
**5** Kaj kiam la kesto de interligo de la Eternulo venis
en la tendaron, tiam la tuta Izrael faris tian grandan
kriadon, ke la tero ekbruis. **6** Kiam la Filiŝtoj aŭdis la
laŭtan kriadon, ili diris: Kion signifas ĉi tiu granda
kaj forta kriado en la tendaro de la Hebreoj? Kaj ili
eksciis, ke la kesto de la Eternulo venis en la tendaron.
**7** Kaj la Filiŝtoj ektimis, ĉar ili diris: Venis Dio en la
tendaron. Kaj ili diris: Ve al ni! ĉar ne estis tiel antaŭe.
**8** Ve al ni! kiu savos nin kontraŭ la manoj de tiuj fortaj
dioj? tio estas tiuj dioj, kiuj frapis la Egiptojn per
ĉiaj frapoj en la dezerto. **9** Estu kuraĝaj kaj viraj, ho
Filiŝtoj, por ke vi ne fariĝu sklavoj al la Hebreoj, kiel
ili estis sklavoj al vi; estu viroj kaj batalu. **10** Kaj la
Filiŝtoj batalis, kaj la Izraelidoj estis venkobatitaj, kaj
ili forkuris ĉiu al sia tendo; kaj la venkobato estis tre
granda, kaj falis el la Izraelidoj tridek mil piedirantoj.
**11** Kaj la kesto de Dio estis prenita, kaj la du filoj de
Eli, Ĥofni kaj Pineĥas, mortis. **12** Unu Benjamenido
kuris el la militistaro kaj venis en Ŝilon en la sama
tago, kaj liaj vestoj estis disŝiritaj, kaj tero estis sur lia
kapo. **13** Kiam li venis, Eli sidis sur seĝo, rigardante
sur la vojon, ĉar lia koro tremis pri la kesto de Dio.
Kaj tiu homo venis, por sciigi en la urbo, kaj ekkriis la
tuta urbo. **14** Kiam Eli aŭdis la kriadon, li diris: Kion
signifas ĉi tiu tumulta kriado? Kaj la viro rapide venis
kaj sciigis al Eli. **15** Eli tiam havis la aĝon de naŭdek
ok jaroj, kaj liaj okuloj malakriĝis, kaj li ne povis vidi.
**16** Kaj tiu viro diris al Eli: Mi venis el la militistaro, mi
alkuris hodiaŭ el la militistaro. Kaj Eli diris: Kia estis
la afero, mia filo? **17** Kaj la sciiganto respondis kaj
diris: Izrael forkuris antaŭ la Filiŝtoj, kaj granda frapo
trafis la popolon, kaj ankaŭ viaj du filoj, Ĥofni kaj
Pineĥas, mortis, kaj la kesto de Dio estas forprenita.
**18** Apenaŭ li menciis la keston de Dio, Eli falis de la
seĝo malantaŭen ĉe la pordego, rompis al si la kolon,
kaj mortis; ĉar li estis maljuna kaj peza. Li estis juĝisto
de Izrael dum kvardek jaroj. **19** Lia bofilino, la edzino
de Pineĥas, estis graveda, baldaŭ naskonta. Kiam ŝi
aŭdis la sciigon pri la forpreno de la kesto de Dio kaj
pri la morto de sia bopatro kaj de sia edzo, ŝi kliniĝis
kaj naskis, ĉar subite atakis ŝin la naskaj doloroj. **20**
Kaj dum ŝi estis mortanta, la virinoj, kiuj ŝin ĉirkaŭis,
diris: Ne timu, ĉar vi naskis filon; sed ŝi ne respondis,

kaj ne prenis tion al sia koro. 21 Kaj ŝi donis al la
knabo la nomon Ikabod, dirante: For estas la gloro de
Izrael; ĉar forprenita estis la kesto de Dio kaj pereis
ŝia bopatro kaj ŝia edzo. 22 Kaj ŝi diris: For estas la
gloro de Izrael, ĉar forprenita estas la kesto de Dio.

5 La Filiŝtoj prenis la keston de Dio kaj portis ĝin
el Eben-Ezer en Aŝdodon. 2 Kaj la Filiŝtoj prenis
la keston de Dio kaj enportis ĝin en la templon de
Dagon kaj starigis ĝin apude de Dagon. 3 Sed kiam
la Aŝdodanoj en la morgaŭa tago leviĝis, ili vidis,
ke jen Dagon kuŝas vizaĝaltere antaŭ la kesto de la
Eternulo. Kaj ili prenis Dagonon kaj restarigis lin sur
lia loko. 4 Kiam ili en la morgaŭa tago matene leviĝis,
ili vidis, ke jen Dagon kuŝas vizaĝaltere antaŭ la kesto
de la Eternulo; la kapo de Dagon kaj liaj ambaŭ manoj
dehakitaj kuŝas sur la sojlo, nur la torso restis. 5
Pro tio la pastroj de Dagon, kaj ĉiuj, kiuj eniras en la
templon de Dagon en Aŝdod, ne paŝas sur la sojlon de
Dagon ĝis la nuna tago. 6 Kaj la mano de la Eternulo
peze falis sur la Aŝdodanojn, kaj Li komencis ekstermi
ilin kaj frapis ilin per tuberoj, en Aŝdod kaj en ĝiaj
ĉirkaŭaĵoj. 7 Kiam la Aŝdodanoj vidis, ke estas tiel,
tiam ili diris: Ne restu ĉe ni la kesto de la Dio de
Izrael, ĉar peza estas Lia mano sur ni kaj sur nia dio
Dagon. 8 Ili sendis kaj kunvenigis al si ĉiujn estrojn de
la Filiŝtoj, kaj diris: Kion ni faru kun la kesto de la Dio
de Izrael? Kaj tiuj diris: Oni transportu la keston de la
Dio de Izrael en Gaton. Kaj oni transportis la keston
de la Dio de Izrael. 9 Sed kiam oni transportis ĝin,
la mano de la Eternulo faris en la urbo tre grandan
tumulton, kaj Li frapis la loĝantojn de la urbo, kiel la
malgrandajn, tiel ankaŭ la grandajn, kaj aperis sur
ili tuberoj. 10 Tiam ili forsendis la keston de Dio en
Ekronon. Sed kiam la kesto de Dio venis en Ekronon,
la Ekronanoj ekkriis, dirante: Oni alportis al ni la
keston de la Dio de Izrael, por mortigi nin kaj nian
popolon. 11 Ili sendis kaj kunvenigis ĉiujn estrojn de
la Filiŝtoj, kaj diris: Forsendu la keston de la Dio de
Izrael, ke ĝi revenu sur sian lokon kaj ne mortigu
nin kaj nian popolon; ĉar en la tuta urbo estis morta
teruro, tiel forte pezis la mano de Dio. 12 Kaj la homoj,
kiuj ne mortis, estis frapitaj per tuberoj, kaj la kriado
de la urbo leviĝis ĝis la ĉielo.

6 La kesto de la Eternulo estis en la lando de la
Filiŝtoj dum sep monatoj. 2 Kaj la Filiŝtoj vokis
la pastrojn kaj la aŭguristojn, kaj diris: Kion ni faru
kun la kesto de la Eternulo? sciigu al ni, kiamaniere
ni resendu ĝin sur ĝian lokon. 3 Kaj tiuj diris: Se vi
volas resendi la keston de la Dio de Izrael, ne resendu
ĝin sen donacoj, sed repagu al Li prokulpan oferon;
tiam vi resaniĝos, kaj ekscios, kial ne foriĝas de vi Lia
mano. 4 Kaj ili diris: Kian prokulpan oferon ni repagu
al Li? Kaj tiuj diris: Laŭ la nombro de la estroj de la
Filiŝtoj kvin orajn tuberojn kaj kvin orajn musojn;
ĉar la sama frapo trafis vin ĉiujn kaj viajn estrojn. 5
Faru bildojn de viaj tuberoj kaj bildojn de viaj musoj,
kiuj ruinigis la landon, kaj faru honoron al la Dio de
Izrael; tiam Li eble malplipezigos Sian manon sur vi
kaj sur viaj dioj kaj sur via lando. 6 Kial vi obstinigus
vian koron, kiel obstinigis sian koron Faraono kaj
la Egiptoj? kiam Li montris sur ili Sian forton, ili ja
forliberigis ilin, ke ili iru. 7 Nun faru novan ĉaron,
kaj prenu du suĉigantajn bovinojn, kiuj ankoraŭ ne
havis sur si jugon, kaj jungu la bovinojn al la ĉaro, kaj
iliajn idojn forkonduku de ili hejmen. 8 Kaj prenu la
keston de la Eternulo, kaj metu ĝin sur la ĉaron; kaj la
orajn objektojn, kiujn vi donos al Li kiel prokulpan
oferon, metu en kesteton apud ĝin, kaj forsendu ĝin,
ke ĝi iru. 9 Kaj rigardu: se ĝi iros laŭ la vojo al sia
regiono, al Bet-Ŝemeŝ, tiam Li faris al ni tiun grandan
malbonon; se ne, tiam ni scios, ke ne Lia mano frapis
nin, sed ke tio trafis nin blindokaze. 10 Kaj la homoj
faris tiel, kaj ili prenis du suĉigantajn bovinojn kaj
aljungis ilin al ĉaro, kaj iliajn idojn ili enŝlosis hejme;
11 kaj ili metis la keston de la Eternulo sur la ĉaron,
kaj ankaŭ la kesteton kun la oraj musoj kaj kun la
bildoj de siaj tuberoj. 12 Kaj la bovinoj direktis sian
iradon al la vojo, kiu kondukas al Bet-Ŝemeŝ; ili iris
nur sur unu vojeto, iris kaj blekis, sed ne forflankiĝis
dekstren nek maldekstren; kaj la estroj de la Filiŝtoj
iris post ili ĝis la limo de Bet-Ŝemeŝ. 13 Kaj la loĝantoj
de Bet-Ŝemeŝ estis rikoltantaj tritikon en la valo; kiam
ili levis la okulojn kaj ekvidis la keston, ili ekĝojis pro
tio, kion ili vidis. 14 La ĉaro venis sur la kampon de
Josuo, Bet-Ŝemeŝano, kaj haltis tie; tie estis granda
ŝtono. Kaj oni dishakis la lignon de la ĉaro, kaj la
bovinojn oni oferis brulofere al la Eternulo. 15 La
Levidoj malsuprenprenis la keston de la Eternulo,
kaj la kesteton, kiu estis apud ĝi kaj enhavis la orajn
objektojn, kaj ili metis tion sur la grandan ŝtonon; kaj
la loĝantoj de Bet-Ŝemeŝ faris bruloferojn kaj buĉis
buĉoferojn al la Eternulo en tiu tago. 16 Kaj la kvin
estroj de la Filiŝtoj vidis, kaj reiris en Ekronon en la

sama tago. 17 Kaj jen estas la oraj tuberoj, kiujn la
Filiŝtoj donis kiel prokulpan oferon al la Eternulo: unu
pro Aŝdod, unu pro Gaza, unu pro Aŝkelon, unu pro
Gat, unu pro Ekron. 18 La oraj musoj, laŭ la nombro de
ĉiuj urboj Filiŝtaj en la kvin provincoj, kiel de la urboj
fortikigitaj, tiel ankaŭ de la neŝirmitaj vilaĝoj, kaj
ankaŭ la granda ŝtono, sur kiun oni metis la keston
de la Eternulo, estas kaŝitaj ĝis nun sur la kampo de
Josuo, la Bet-Ŝemeŝano. 19 Kaj Li frapis la loĝantojn
de Bet-Ŝemeŝ pro tio, ke ili enrigardis en la keston de
la Eternulo; Li mortigis el la popolo [kvindek mil] -
sepdek homojn; kaj ekfunebris la popolo pro tio, ke la
Eternulo frapis la popolon per granda frapo. 20 Kaj la
loĝantoj de Bet-Ŝemeŝ diris: Kiu povas stari antaŭ la
Eternulo, tiu sankta Dio? kaj al kiu Li iros de ni? 21
Kaj ili sendis senditojn al la loĝantoj de Kirjat-Jearim,
por diri: La Filiŝtoj redonis la keston de la Eternulo;
venu, prenu ĝin al vi.

7 Kaj venis la loĝantoj de Kirjat-Jearim, kaj prenis la
keston de la Eternulo kaj alportis ĝin en la domon
de Abinadab sur la monteton, kaj lian filon Eleazar ili
konsekris, por gardi la keston de la Eternulo. 2 De la
tago, de kiam la kesto restis en Kirjat-Jearim, pasis
multe da tempo, pasis dudek jaroj. Kaj la tuta domo
de Izrael sopiris pri la Eternulo. 3 Kaj Samuel diris al
la tuta domo de Izrael jene: Se per via tuta koro vi
konvertiĝis al la Eternulo, tiam forigu el inter vi la
fremdajn diojn kaj la Aŝtarojn, kaj turnu vian koron
al la Eternulo kaj servu al Li sola, kaj Li savos vin
el la manoj de la Filiŝtoj. 4 Kaj la Izraelidoj forigis
la Baalojn kaj la Aŝtarojn, kaj komencis servadi al
la Eternulo sola. 5 Kaj Samuel diris: Kunvenigu la
tutan Izraelon en Micpan, kaj mi preĝos por vi al la
Eternulo. 6 Kaj ili kunvenis en Micpan, kaj ĉerpis
akvon kaj verŝis antaŭ la Eternulo, kaj fastis en tiu
tago, kaj diris tie: Ni pekis antaŭ la Eternulo. Kaj
Samuel juĝis la Izraelidojn en Micpa. 7 Kiam la Filiŝtoj
aŭdis, ke la Izraelidoj kolektiĝis en Micpa, la estroj de
la Filiŝtoj elmoviĝis kontraŭ Izraelon. Aŭdinte tion, la
Izraelidoj ektimis antaŭ la Filiŝtoj. 8 Kaj la Izraelidoj
diris al Samuel: Ne ĉesu krii por ni al la Eternulo, nia
Dio, ke Li savu nin kontraŭ la manoj de la Filiŝtoj. 9
Tiam Samuel prenis unu suĉantan ŝafidon kaj oferis
ĝin tutan brulofere al la Eternulo, kaj Samuel vokis al
la Eternulo por Izrael, kaj la Eternulo aŭskultis lin. 10
Kaj dum Samuel estis oferanta la bruloferon, la Filiŝtoj
venis, por batali kontraŭ la Izraelidoj. Sed la Eternulo
ektondris en tiu tago per granda tondro super la
Filiŝtoj kaj teruris ilin, kaj ili estis frapitaj antaŭ Izrael.
11 Kaj la viroj de Izrael eliris el Micpa kaj persekutis la
Filiŝtojn, kaj batis ilin ĝis sub Bet-Kar. 12 Kaj Samuel
prenis unu ŝtonon, kaj metis ĝin inter Micpa kaj Ŝen,
kaj donis al ĝi la nomon Eben-Ezer, dirante: Ĝis ĉi tiu
loko helpis nin la Eternulo. 13 Tiamaniere la Filiŝtoj
estis kvietigitaj, kaj ne venadis plu en la regionon de
Izrael. Kaj la mano de la Eternulo estis super la Filiŝtoj
dum la tuta vivo de Samuel. 14 Kaj estis redonitaj al
Izrael la urboj, kiujn la Filiŝtoj prenis de Izrael, de
Ekron ĝis Gat, kaj iliajn regionojn Izrael savis el la
manoj de la Filiŝtoj. Kaj estis paco inter Izrael kaj la
Amoridoj. 15 Kaj Samuel estis juĝisto de Izrael dum
sia tuta vivo. 16 Kaj li iradis ĉiujare ĉirkaŭe en Bet-
Elon, Gilgalon, kaj Micpan, kaj juĝadis Izraelon en
ĉiuj tiuj lokoj. 17 Kaj li revenadis en Raman, ĉar tie
estis lia domo; kaj tie ankaŭ li juĝadis Izraelon, kaj li
konstruis tie altaron al la Eternulo.

8 Kiam Samuel maljuniĝis, li faris siajn filojn juĝistoj
de Izrael. 2 La nomo de lia unuenaskita filo estis
Joel, kaj la nomo de lia dua filo estis Abija; ili juĝadis
en Beer-Ŝeba. 3 Sed liaj filoj ne iris laŭ lia vojo; ili
serĉis profiton, ili prenadis subaĉeton kaj juĝadis
maljuste. 4 Kaj kolektiĝis ĉiuj plejaĝuloj de Izrael kaj
venis al Samuel en Raman, 5 kaj diris al li: Jen vi
maljuniĝis, kaj viaj filoj ne iras laŭ via vojo; starigu do
al ni reĝon, por ke li juĝadu nin, kiel ĉe ĉiuj popoloj. 6
Ne plaĉis la afero al Samuel, kiam ili diris: Starigu al
ni reĝon, por ke li juĝadu nin. Kaj Samuel ekpreĝis al
la Eternulo. 7 Kaj la Eternulo diris al Samuel: Obeu la
voĉon de la popolo en ĉio, kion ili diros al vi; ĉar ne
vin ili forpuŝis, sed Min ili forpuŝis de regado super
ili. 8 Simile al ĉiuj agoj, kiujn ili faris de la tempo,
kiam Mi elkondukis ilin el Egiptujo, ĝis nun, kaj kiel ili
forlasis Min kaj servis al aliaj dioj, tiel ili agas ankaŭ
kun vi. 9 Nun obeu ilian voĉon, tamen klarigu al ili
kaj sciigu al ili la rajtojn de la reĝo, kiu reĝos super ili.
10 Kaj Samuel raportis ĉiujn vortojn de la Eternulo al
la popolo, kiu petis de li reĝon. 11 Kaj li diris: Tiaj
estos la rajtoj de la reĝo, kiu reĝos super vi: viajn
filojn li prenos por siaj ĉaroj kaj por siaj ĉevaloj, kaj ili
kurados antaŭ lia ĉaro; 12 kaj li faros ilin milestroj
kaj kvindekestroj, kaj devigos ilin plugi lian kampon
kaj rikolti lian rikolton kaj fari liajn batalilojn kaj la

apartenaĵojn de lia ĉaro; 13 kaj viajn filinojn li prenos
kiel ŝmiraĵistinojn, kuiristinojn, kaj bakistinojn. 14 Kaj
viajn plej bonajn kampojn kaj vinberĝardenojn kaj
olivĝardenojn li prenos, kaj donos al siaj servantoj.
15 Kaj el viaj semitaĵoj kaj vinberĝardenoj li prenos
dekonaĵon, kaj donos al siaj korteganoj kaj al siaj
servantoj. 16 Kaj viajn servantojn kaj servantinojn
kaj viajn plej bonajn junulojn kaj viajn azenojn li
prenos, kaj uzos por siaj laboroj. 17 El viaj ŝafoj li
prenos dekonon, kaj vi fariĝos por li sklavoj. 18 Tiam
vi ekkrios pro via reĝo, kiun vi elektis al vi, sed la
Eternulo tiam ne aŭskultos vin. 19 Sed la popolo ne
volis obei la voĉon de Samuel kaj diris: Ne, reĝo estu
super ni; 20 kaj ni ankaŭ estu kiel ĉiuj popoloj, kaj
nia reĝo juĝadu nin kaj iradu antaŭ ni kaj kondukadu
niajn militojn. 21 Kaj Samuel aŭskultis ĉiujn vortojn
de la popolo, kaj raportis ilin al la Eternulo. 22 Kaj la
Eternulo diris al Samuel: Obeu ilian voĉon, kaj starigu
super ili reĝon. Kaj Samuel diris al la viroj de Izrael:
Iru ĉiu en sian urbon.

**9** Estis viro el la Benjamenidoj, kiu havis la nomon
Kiŝ, filo de Abiel, filo de Ceror, filo de Beĥorat, filo
de Afiaĥ, Benjamenido, viro forta. 2 Li havis filon,
kies nomo estis Saul; ĉi tiu estis juna kaj bela, kaj
neniu el la Izraelidoj estis pli bela ol li; de siaj ŝultroj
supren li estis pli alta ol la tuta popolo. 3 Perdiĝis
azeninoj de Kiŝ, patro de Saul; kaj Kiŝ diris al sia filo
Saul: Prenu kun vi unu el la junuloj, kaj leviĝu, kaj
iru serĉi la azeninojn. 4 Kaj li iris sur la monton de
Efraim kaj trairis la landon Ŝaliŝa, sed ili ne trovis; kaj
ili trairis la landon Ŝaalim, sed tie ne troviĝis; kaj li
trairis la landon de Benjamen, sed ili ne trovis. 5 Kiam
li venis en la landon Cuf, Saul diris al la junulo, kiu
estis kun li: Venu, ni reiru hejmen, ĉar alie mia patro
eble ĉesos pensi pri la azeninoj kaj estos maltrankvila
pri ni. 6 Kaj tiu diris al li: Jen en ĉi tiu urbo estas
Dia homo, homo respektata; ĉio, kion li diras, nepre
plenumiĝas; ni iru do tien, eble li montros al ni la
vojon, kiun ni devas iri. 7 Kaj Saul diris al sia junulo:
Bone, ni iros, sed kion ni alportos al la homo? ĉar
la pano elĉerpiĝis en nia sako, kaj ni havas nenian
donacon, por alporti al la Dia homo; kion ni havas? 8
La junulo plue respondis al Saul kaj diris: Jen en mia
mano troviĝas kvarono de arĝenta siklo; mi donos
ĝin al la Dia homo, kaj li montros al ni la vojon. 9
(En la antaŭa tempo ĉe Izrael oni tiel diradis, kiam
oni iris demandi Dion: Ni iru al la antaŭvidisto; ĉar
kion oni nun nomas profeto, tion oni antaŭe nomis
antaŭvidisto.) 10 Kaj Saul diris al sia junulo: Bone vi
diris; ni iru. Kaj ili iris en la urbon, en kiu loĝis la
Dia homo. 11 Irante supren en la urbon, ili renkontis
knabinojn, kiuj eliris, por ĉerpi akvon; kaj ili diris
al tiuj: Ĉu la antaŭvidisto estas ĉi tie? 12 Kaj tiuj
respondis al ili kaj diris: Ĉi tie; jen li estas antaŭ vi;
nun rapidu, ĉar hodiaŭ li venis en la urbon, ĉar hodiaŭ
la popolo alportas buĉoferon sur la altaĵo. 13 Kiam vi
eniros en la urbon, vi tuj trovos lin, antaŭ ol li iros
sur la altaĵon, por manĝi; ĉar la popolo ne manĝas
antaŭ lia veno, ĉar li benas la buĉoferon, kaj nur poste
manĝas la invititoj. Iru do, ĉar nun vi lin trovos. 14
Kaj ili iris supren en la urbon. Apenaŭ ili venis en la
mezon de la urbo, jen Samuel eliras renkonte al ili,
por iri sur la altaĵon. 15 Dume la Eternulo revelaciis al
la oreloj de Samuel, unu tagon antaŭ la veno de Saul,
dirante: 16 Morgaŭ en ĉi tiu tempo Mi sendos al vi
homon el la lando de Benjamen, kaj vi sanktoleos lin
kiel ĉefon super Mia popolo Izrael, kaj li savos Mian
popolon el la manoj de la Filiŝtoj; ĉar Mi vidis Mian
popolon, kaj ĝiaj krioj atingis Min. 17 Kiam Samuel
ekvidis Saulon, la Eternulo diris al li: Jen estas la
homo, pri kiu Mi diris al vi, ke li regos super Mia
popolo. 18 Saul alproksimiĝis al Samuel en la pordego,
kaj diris: Diru al mi, mi petas, kie estas ĉi tie la domo
de la antaŭvidisto. 19 Kaj Samuel respondis al Saul
kaj diris: Mi estas la antaŭvidisto; iru antaŭ mi sur
la altaĵon; vi manĝos kun mi hodiaŭ, kaj morgaŭ mi
lasos vin for, kaj mi diros al vi ĉion, kio estas en via
koro. 20 Kaj pri la azeninoj, kiuj perdiĝis ĉe vi antaŭ
tri tagoj, ne zorgu, ĉar ili estas trovitaj. Kaj al kiu
apartenos ĉio plej bona en Izrael? ĉu ne al vi kaj al la
tuta domo de via patro? 21 Saul respondis kaj diris: Mi
estas ja Benjamenido, el la plej malgrandaj triboj de
Izrael, kaj mia familio estas la plej malgranda el ĉiuj
familioj de la tribo de Benjamen; kial do vi diris al mi
tiajn vortojn? 22 Tiam Samuel prenis Saulon kaj lian
junulon, kaj enkondukis ilin en la manĝoĉambron, kaj
donis al ili lokon supraloke de la invititoj, kiuj estis en
la nombro de ĉirkaŭ tridek homoj. 23 Kaj Samuel diris
al la kuiristo: Donu tiun porcion, kiun mi donis al vi
kaj pri kiu mi diris al vi, ke vi retenu ĝin ĉe vi. 24 Kaj
la kuiristo prezentis femuron, kaj tion, kio estas kun
ĝi, kaj metis tion antaŭ Saulon, kaj Samuel diris: Jen
estas, kio restis; metu ĝin antaŭ vin kaj manĝu, ĉar ĝi

estas rezervita por vi por la tempo, por kiu mi invitis
la popolon. Kaj Saul manĝis kun Samuel en tiu tago.
25 Kaj ili malsupreniris de la altaĵo en la urbon, kaj
Samuel parolis kun Saul sur la tegmento. 26 Kaj ili
leviĝis frue; kaj kiam la matenruĝo leviĝis, Samuel
vokis Saulon sur la tegmenton, kaj diris: Leviĝu, mi
lasos vin for. Kaj Saul leviĝis, kaj ili eliris ambaŭ, li kaj
Samuel, eksteren. 27 Kiam ili atingis la finon de la
urbo, Samuel diris al Saul: Diru al la junulo, ke li iru
antaŭen (kaj tiu iris antaŭen); kaj vi haltu nun, kaj mi
anoncos al vi la diron de Dio.

10 Tiam Samuel prenis kruĉeton kun oleo kaj verŝis
sur lian kapon, kaj kisis lin, kaj diris: Vidu, la
Eternulo sanktoleis vin kiel ĉefon super Sia heredaĵo.
2 Kiam vi hodiaŭ foriros de mi, vi trovos ĉe la tombo
de Raĥel, en la regiono de Benjamen, en Celcaĥ, du
homojn, kiuj diros al vi: Estas trovitaj la azeninoj,
kiujn vi iris serĉi, kaj jen via patro ĉesis pensi pri la
azeninoj, kaj estas maltrankvila pri vi, dirante: Kion mi
faru koncerne mian filon? 3 Kaj kiam vi foriros de tie
pluen kaj venos al la kverko de Tabor, renkontos vin
tie tri homoj, irantaj al Dio en Bet-Elon; unu portas tri
kapridojn, la dua portas tri bulojn da pano, kaj la tria
portas felsakon da vino. 4 Kaj ili salutos vin, kaj donos
al vi du panojn; kaj vi prenu el iliaj manoj. 5 Poste
vi venos al la monteto de Dio, kie estas garnizono
de la Filiŝtoj; kaj kiam vi tie eniros en la urbon, vi
renkontos grupon da profetoj, irantaj malsupren de
la altaĵo, kaj antaŭ ili psalteron, tamburinon, fluton,
kaj harpon, kaj ili profetas. 6 Kaj penetros vin la
spirito de la Eternulo, kaj vi ekprofetos kune kun ili,
kaj vi fariĝos alia homo. 7 Kiam plenumiĝos super
vi ĉi tiuj antaŭsignoj, tiam faru, kion bontrovos via
mano, ĉar Dio estas kun vi. 8 Kaj vi iros antaŭ mi en
Gilgalon; poste mi venos al vi, por fari bruloferojn,
por buĉi pacoferojn. Sep tagojn atendu, ĝis mi venos
al vi, kaj sciigos al vi, kion vi devas fari. 9 Kaj kiam li
turnis siajn ŝultrojn, por foriri de Samuel, Dio donis al
li alian koron, kaj ĉiuj tiuj antaŭsignoj plenumiĝis
en tiu tago. 10 Kiam ili venis tien al la monteto, jen
grupo da profetoj iras al li renkonte; kaj penetris lin
la spirito de la Eternulo, kaj li ekprofetis meze de ili.
11 Kaj kiam ĉiuj, kiuj konis lin de antaŭe, vidis, ke li
profetas kun profetoj, tiam la homoj diris unu al alia:
Kio fariĝis kun la filo de Kiŝ? ĉu ankaŭ Saul estas inter
la profetoj? 12 Kaj unu el tie respondis kaj diris: Kiu
estas ilia patro? De tio devenis la proverbo: Ĉu ankaŭ
Saul estas inter la profetoj? 13 Kaj ĉesinte profeti, li
venis sur la altaĵon. 14 Kaj la onklo de Saul diris al
li kaj al lia junulo: Kien vi iris? Kaj li respondis: Por
serĉi la azeninojn; sed kiam ni vidis, ke ili ne troviĝas,
ni iris al Samuel. 15 Tiam diris la onklo de Saul: Diru
al mi, mi petas, kion diris al vi Samuel. 16 Kaj Saul
diris al sia onklo: Li diris al ni, ke la azeninoj estas
trovitaj. Sed tion, kion Samuel diris pri la reĝado, li
ne diris al li. 17 Dume Samuel kunvenigis la popolon
al la Eternulo en Micpan. 18 Kaj li diris al la Izraelidoj:
Tiel diris la Eternulo, Dio de Izrael: Mi elkondukis
Izraelon el Egiptujo, kaj savis vin el la manoj de la
Egiptoj, kaj el la manoj de ĉiuj regnoj, kiuj premis
vin. 19 Sed vi nun forrifuzis vian Dion, kiu savas vin el
ĉiuj viaj mizeroj kaj suferoj, kaj vi diris al Li: Reĝon
starigu super ni. Stariĝu do nun antaŭ la Eternulo
laŭ viaj triboj kaj familioj. 20 Kaj Samuel alvenigis
ĉiujn tribojn de Izrael; kaj la loto trafis la tribon de
Benjamen. 21 Kaj li alvenigis la tribon de Benjamen
laŭ ĝiaj familioj, kaj la loto trafis la familion de Matri;
kaj la loto trafis Saulon, filon de Kiŝ. Oni serĉis lin,
sed oni lin ne trovis. 22 Tiam oni demandis ankoraŭ la
Eternulon: Ĉu la viro ankoraŭ venos ĉi tien? Kaj la
Eternulo diris: Jen li kaŝis sin inter la vazaro. 23 Kaj
oni kuris, kaj prenis lin de tie; kaj li stariĝis meze de
la popolo, kaj de la ŝultroj supren li estis pli alta ol la
tuta popolo. 24 Kaj Samuel diris al la tuta popolo: Ĉu vi
vidas, kiun la Eternulo elektis? ĉar ne ekzistas simila
al li en la tuta popolo. Kaj la tuta popolo ekkriis, kaj
diris: Vivu la reĝo! 25 Kaj Samuel klarigis al la popolo
la rajtojn de la reĝado, kaj skribis tion en libron kaj
metis antaŭ la Eternulon. Kaj Samuel foririgis la tutan
popolon ĉiun al lia domo. 26 Kaj Saul ankaŭ iris al sia
domo en Gibean; kaj iris kun li la militistoj, kies koron
Dio ektuŝis. 27 Sed la sentaŭguloj diris: Kiamaniere
helpos nin ĉi tiu? Kaj ili malestimis lin, kaj ne alportis
al li donacojn; sed li ŝajnigis, ke li ne aŭdas.

11 Venis Naĥaŝ la Amonido, kaj stariĝis tendare
antaŭ Jabeŝ en Gilead. Kaj ĉiuj loĝantoj de Jabeŝ
diris al Naĥaŝ: Faru kun ni interligon, kaj ni servos
al vi. 2 Sed Naĥaŝ la Amonido diris al ili: Mi faros
kun la kondiĉo, ke al ĉiuj el vi mi elpikos la dekstran
okulon kaj per tio metos malhonoron sur la tutan
Izraelon. 3 Tiam diris al li la plejaĝuloj de Jabeŝ: Donu
al ni tempon de sep tagoj, por ke ni sendu senditojn

en ĉiujn regionojn de Izrael; kaj se neniu nin helpos,
tiam ni eliros al vi. 4 Kaj venis la senditoj en Gibean
de Saul kaj diris tiujn vortojn al la oreloj de la popolo,
kaj la tuta popolo laŭte ekploris. 5 Sed jen Saul venas
de la kampo malantaŭ la bovoj. Kaj Saul diris: Kio
estas al la popolo, ke ili ploras? Kaj oni transdiris al
li la vortojn de la loĝantoj de Jabeŝ. 6 Kaj la spirito
de Dio penetris Saulon, kiam li aŭdis tiujn vortojn,
kaj forte ekflamis lia kolero. 7 Kaj li prenis paron da
bovoj kaj dishakis ilin, kaj dissendis la partojn per la
senditoj en ĉiujn regionojn de Izrael, dirante: Se iu ne
eliros post Saul kaj post Samuel, tiam tiel estos farite
kun liaj bovoj. Kaj timo antaŭ la Eternulo falis sur la
popolon, kaj ili eliris kiel unu homo. 8 Li kalkulis ilin
en Bezek, kaj la nombro de la Izraelidoj estis tricent
mil, kaj la nombro de la Jehudaidoj estis tridek mil.
9 Kaj ili diris al la venintaj senditoj: Tiel diru al la
loĝantoj de Jabeŝ en Gilead: Morgaŭ venos al vi helpo,
kiam la suno brilos varmege. Kaj la senditoj venis kaj
raportis al la loĝantoj de Jabeŝ, kaj tiuj ĝojis. 10 Kaj
la loĝantoj de Jabeŝ diris: Morgaŭ ni eliros al vi, por
ke vi agu kun ni, kiel plaĉos al vi. 11 En la sekvanta
tago Saul dividis la popolon en tri taĉmentojn, kaj ili
eniris en la tendaron dum la matena gardotempo,
kaj venkobatis la Amonidojn, antaŭ ol la tago fariĝis
varma; la restintoj diskuris tiel, ke ne restis eĉ du
kune. 12 Kaj la popolo diris al Samuel: Kiuj estas tiuj,
kiuj diris: Ĉu Saul reĝos super ni? Donu tiujn homojn,
ke ni ilin mortigu. 13 Sed Saul diris: Neniun oni devas
mortigi en ĉi tiu tago, ĉar hodiaŭ la Eternulo faris
savon al Izrael. 14 Kaj Samuel diris al la popolo: Venu,
ni iru en Gilgalon, kaj ni novofestos tie la reĝecon.
15 Kaj la tuta popolo iris en Gilgalon, kaj ili reĝigis
tie Saulon antaŭ la Eternulo en Gilgal, kaj buĉis tie
pacoferojn antaŭ la Eternulo, kaj forte gajis tie Saul
kaj ĉiuj Izraelidoj.

12 Tiam Samuel diris al ĉiuj Izraelidoj: Jen mi obeis
vian voĉon pri ĉio, kion vi diris al mi, kaj mi
starigis por vi reĝon. 2 Kaj nun jen la reĝo iras antaŭ
vi, kaj mi maljuniĝis kaj griziĝis, kaj miaj filoj estas
ĉi tie inter vi; mi iradis antaŭ vi de mia juneco ĝis
la nuna tago. 3 Jen mi estas; parolu pri mi antaŭ
la Eternulo kaj antaŭ Lia sanktoleito: kies bovon mi
prenis? kaj kies azenon mi prenis? kaj kontraŭ kiu mi
agis maljuste? kaj kiun mi premis? kaj el kies mano
mi prenis subaĉeton, por ke mi kovru miajn okulojn
koncerne lin? kaj mi repagos al vi. 4 Sed ili diris: Vi
faris al ni nenian perfortaĵon nek maljustaĵon, kaj
vi nenion prenis el ies mano. 5 Kaj li diris al ili: La
Eternulo estas atestanto antaŭ vi, kaj Lia sanktoleito
estas atestanto hodiaŭ, ke vi nenion trovis en mia
mano. Kaj ili diris: Atestanto. 6 Tiam Samuel diris al la
popolo: La Eternulo, kiu starigis Moseon kaj Aaronon,
kaj kiu elkondukis viajn patrojn el la lando Egipta.
7 Nun stariĝu, kaj mi faru juĝan analizon koncerne
vin antaŭ la Eternulo pri ĉiuj bonfaroj de la Eternulo,
kiujn Li faris al vi kaj al viaj patroj. 8 Kiam Jakob venis
en Egiptujon kaj viaj patroj ekkriis al la Eternulo,
tiam la Eternulo sendis Moseon kaj Aaronon, kaj ili
elkondukis viajn patrojn el Egiptujo kaj ekloĝigis ilin
sur ĉi tiu loko. 9 Sed ili forgesis la Eternulon, sian
Dion, kaj Li transdonis ilin en la manojn de Sisera,
militestro de Ĥacor, kaj en la manojn de la Filiŝtoj
kaj en la manojn de la reĝo de Moab, kiuj militis
kontraŭ ili. 10 Tiam ili ekkriis al la Eternulo, kaj diris:
Ni pekis, ĉar ni forlasis la Eternulon kaj servis al la
Baaloj kaj al la Aŝtaroj; nun savu nin el la manoj
de niaj malamikoj, kaj ni servos al Vi. 11 Tiam la
Eternulo sendis Jerubaalon kaj Bedanon kaj Jiftaĥon
kaj Samuelon, kaj Li savis vin el la manoj de viaj
malamikoj ĉirkaŭe, kaj vi restis eksterdanĝeraj. 12 Sed
kiam vi vidis, ke Naĥaŝ, reĝo de la Amonidoj, venis
kontraŭ vin, vi diris al mi: Ne, reĝo regu super ni; kaj
la Eternulo, via Dio, estas ja via reĝo. 13 Nun jen estas
la reĝo, kiun vi elektis, pri kiu vi petis; jen la Eternulo
starigis reĝon super vi. 14 Se vi timos la Eternulon
kaj servos al Li kaj obeos Lian voĉon kaj ne ribelos
kontraŭ la diro de la Eternulo, tiam vi kaj ankaŭ la
reĝo, kiu ekregis super vi, estos sub la defendo de la
Eternulo, via Dio. 15 Sed se vi ne obeos la voĉon de la
Eternulo kaj vi ribelos kontraŭ la diro de la Eternulo,
tiam la mano de la Eternulo estos kontraŭ vi, kiel
kontraŭ viaj patroj. 16 Eĉ nun stariĝu, kaj vidu tiun
grandan faron, kiun la Eternulo faros antaŭ vi. 17 Ĉu
ne estas nun rikolto de tritiko? sed mi ekvokos al la
Eternulo, kaj Li donos tondrojn kaj pluvon, por ke vi
sciu kaj vidu, kiel granda estas via malbono, kiun vi
faris antaŭ la Eternulo, petante por vi reĝon. 18 Kaj
Samuel ekvokis al la Eternulo, kaj la Eternulo donis
tondrojn kaj pluvon en tiu tago; kaj forte ektimis
la tuta popolo la Eternulon kaj Samuelon. 19 Kaj la
tuta popolo diris al Samuel: Preĝu por viaj sklavoj al
la Eternulo, via Dio, por ke ni ne mortu; ĉar al ĉiuj

niaj pekoj ni aldonis ankoraŭ malbonagon per tio,
ke ni petis por ni reĝon. 20 Sed Samuel diris al la
popolo: Ne timu; vi faris ja tiun tutan malbonon; nur
ne forturniĝu de la Eternulo, kaj servu al la Eternulo
per via tuta koro. 21 Kaj ne forkliniĝu al la vantaĵoj,
kiuj ne helpas nek savas, ĉar ili estas vantaĵo. 22 La
Eternulo ne forlasos Sian popolon, pro Sia granda
nomo; ĉar la Eternulo bonvolis fari vin Lia popolo. 23
Mi ankaŭ ne permesos al mi peki antaŭ la Eternulo,
ĉesante preĝi por vi, kaj mi gvidados vin laŭ la vojo
bona kaj ĝusta. 24 Nur timu la Eternulon kaj servu al
Li fidele per via tuta koro, ĉar vi vidas, kion grandan
Li faris al vi. 25 Sed se vi agos malbone, tiam ambaŭ,
kiel vi, tiel ankaŭ via reĝo, pereos.

13 Unu jaro pasis post la reĝiĝo de Saul, kaj jam
du jarojn li reĝis super Izrael. 2 Kaj Saul elektis
al si tri mil virojn el Izrael; du mil estis kun Saul en
Miĥmaŝ kaj sur la monto Bet-El, kaj mil estis kun
Jonatan en Gibea de Benjamen; la ceterajn el la popolo
li foririgis ĉiun al lia tendo. 3 Kaj Jonatan venkobatis
la garnizonon de la Filiŝtoj, kiu estis en Geba. Kaj tion
aŭdis la Filiŝtoj; kaj Saul disblovigis per trumpeto tra
la tuta lando, dirante: Aŭdu tion la Hebreoj. 4 Kaj la
tuta Izrael aŭdis jenon: Saul venkobatis la garnizonon
de la Filiŝtoj, kaj Izrael fariĝis malamata por la Filiŝtoj.
Kaj oni kunvokis la popolon al Saul en Gilgalon. 5 Kaj
la Filiŝtoj kolektiĝis, por militi kontraŭ Izrael, tridek
mil ĉaroj kaj ses mil rajdantoj, kaj tiom da popolo,
kiom da sablo sur la bordo de la maro. Kaj ili eliris kaj
stariĝis tendare en Miĥmaŝ, oriente de Bet-Aven. 6 La
Izraelidoj vidis, ke ili estas en mizero, ĉar la popolo
perdis la kuraĝon, kaj la homoj kaŝis sin en kavernoj,
en arbustoj, en rokoj, en kavoj, kaj en putoj. 7 Hebreoj
transiris ankaŭ trans Jordanon en la landon de Gad
kaj en Gileadon. Sed Saul estis ankoraŭ en Gilgal, kaj
la tuta popolo tremis ĉe li. 8 Kaj li atendis sep tagojn
ĝis la templimo, kiun difinis Samuel, sed Samuel ne
venis en Gilgalon; kaj la popolo komencis disiĝi de li.
9 Tiam Saul diris: Alportu al mi la bruloferon kaj la
pacoferojn. Kaj li oferis la bruloferon. 10 Apenaŭ li
finis la oferadon de la brulofero, venis Samuel. Kaj
Saul eliris renkonte al li, por saluti lin. 11 Sed Samuel
diris: Kion vi faris? Saul respondis: Mi vidis, ke la
popolo diskuras de mi, kaj vi ne venis al la difinita
tempo, kaj la Filiŝtoj kolektiĝis en Miĥmaŝ; 12 kaj mi
diris: Nun la Filiŝtoj atakos min ĉi tie en Gilgal, kaj
mi ankoraŭ ne preĝis antaŭ la Eternulo; mi detenis
min, sed fine mi oferis la bruloferon. 13 Tiam Samuel
diris al Saul: Vi agis malprudente, ne plenumante la
ordonon de la Eternulo, via Dio, kiun Li ordonis al
vi; ĉar nun la Eternulo fortikigus vian reĝadon super
Izrael por eterne. 14 Sed nun via reĝado ne longe
daŭros: la Eternulo elserĉis al Si viron laŭ Sia koro, kaj
la Eternulo ordonis al li esti estro super Lia popolo,
ĉar vi ne plenumis tion, kion la Eternulo ordonis al
vi. 15 Kaj Samuel leviĝis kaj iris de Gilgal al Gibea de
Benjamen. Kaj Saul kalkulis la popolon, kiu troviĝis ĉe
li, ĉirkaŭ sescent homoj. 16 Saul kaj lia filo Jonatan,
kaj la popolo, kiu estis kun ili, restis en Gibea de
Benjamen, kaj la Filiŝtoj staris tendare en Miĥmaŝ. 17
Kaj eliris el la tendaro de la Filiŝtoj tri taĉmentoj da
ekstermantoj: unu taĉmento direktis sin laŭ la vojo al
Ofra, al la lando Ŝual; 18 la dua taĉmento direktis sin
laŭ la vojo al Bet-Ĥoron; kaj la tria taĉmento direktis
sin laŭ la lima vojo, kiu kondukas al la valo Ceboim, al
la dezerto. 19 Sed en la tuta lando de Izrael oni ne
povis trovi forĝiston, ĉar la Filiŝtoj zorgis pri tio, ke la
Hebreoj ne faru glavon aŭ ponardegon. 20 Kaj ĉiuj
Izraelidoj devis iri al la Filiŝtoj, se iu bezonis akrigi
sian plugilon aŭ sian fosilon aŭ sian hakilon aŭ sian
rikoltilon. 21 Kaj la tranĉrandoj de la plugilferoj kaj de
la fosiloj kaj de la tridentoj kaj de la hakiloj kaj de la
pikstangoj malakriĝis. 22 Tial en la tago de la batalo
ne troviĝis glavo nek ponardego en la manoj de la tuta
popolo, kiu estis kun Saul kaj kun Jonatan, sed troviĝis
nur ĉe Saul kaj ĉe lia filo Jonatan. 23 Dume gardistaro
el la Filiŝtoj eliris al la trapasejo de Miĥmaŝ.

14 Unu tagon Jonatan, filo de Saul, diris al sia junulo
armilportisto: Venu, ni transiru al la garnizono
de la Filiŝtoj, kiu estas tie transe; sed al sia patro li tion
ne diris. 2 Kaj Saul estis en la randa parto de Gibea,
sub granatarbo, kiu estis en Migron; kaj da popolo
estis kun li ĉirkaŭ sescent homoj. 3 Kaj Aĥija, filo de
Aĥitub, frato de Ikabod, filo de Pinaĥas, filo de Eli,
la pastro de la Eternulo en Ŝilo, estis portanto de la
efodo; kaj la popolo ne sciis, ke Jonatan foriris. 4 Inter
la pasejoj, tra kiuj Jonatan volis transiri al la garnizono
de la Filiŝtoj, estis pinta roko sur unu flanko kaj pinta
roko sur la dua flanko; la nomo de unu estis Bocec,
kaj la nomo de la dua estis Sene. 5 Unu roko elstaris
norde kontraŭ Miĥmaŝ, kaj la dua sude kontraŭ Geba.
6 Kaj Jonatan diris al sia junulo armilportisto: Venu, ni

transiru al la garnizono de tiuj necirkumciditoj; eble
la Eternulo ion faros por ni; ĉar por la Eternulo ne
estas malfacile helpi per multo aŭ per malmulto. **7**
Kaj lia armilportisto diris al li: Faru ĉion, kion diras
al vi via koro; iru antaŭen, mi iros kun vi, kien vi
volas. **8** Tiam Jonatan diris: Jen ni transiros al tiuj
homoj, kaj montros nin al ili. **9** Se ili diros al ni tiel:
Restu, ĝis ni atingos vin — tiam ni haltos sur nia loko
kaj ne supreniros al ili; **10** sed se ili diros tiel: Venu
al ni supren — tiam ni supreniros; ĉar la Eternulo
transdonis ilin en niajn manojn, kaj tio estos por ni
pruvosigno. **11** Kaj ili ambaŭ aperis antaŭ la garnizono
de la Filiŝtoj, kaj la Filiŝtoj diris: Jen Hebreoj eliras
el la truoj, en kiuj ili sin kaŝis. **12** Kaj la homoj el la
garnizono ekparolis al Jonatan kaj al lia armilportisto,
kaj diris: Venu al ni supren, kaj ni klarigos al vi aferon.
Tiam Jonatan diris al sia armilportisto: Sekvu min,
ĉar la Eternulo transdonis ilin en la manojn de Izrael.
**13** Kaj Jonatan ekgrimpis per siaj manoj kaj piedoj, kaj
lia armilportisto post li. Tiam ili ekfalis antaŭ Jonatan,
kaj lia armilportisto mortigis ilin post li. **14** La unua
mortigo, kiun faris Jonatan kaj lia armilportisto, estis
ĉirkaŭ dudek homoj, sur la spaco de ĉirkaŭ duontaga
plugado. **15** Tiam fariĝis teruro en la tendaro, sur la
kampo, kaj inter la tuta popolo; la garnizonanoj kaj la
vagatakistoj ankaŭ ektimis, kaj la tero ektremis, kaj
ekregis tumulto, farita de Dio. **16** La gardostarantoj
de Saul en Gibea de Benjamen ekvidis, ke la amaso
disŝutiĝis kaj kuras en diversajn flankojn. **17** Tiam Saul
diris al la homoj, kiuj estis ĉe li: Esploru kaj rigardu,
kiu foriris de ni. Kaj oni esploris, kaj montriĝis, ke
forestas Jonatan kaj lia armilportisto. **18** Kaj Saul
diris al Aĥija: Venigu la keston de Dio; ĉar la kesto
de Dio estis en tiu tago kun la Izraelidoj. **19** Kaj dum
Saul parolis ankoraŭ kun la pastro, la tumulto en
la tendaro de la Filiŝtoj fariĝis ankoraŭ pli granda.
Kaj Saul diris al la pastro: Retiru vian manon. **20** Kaj
kolektiĝis Saul kaj la tuta popolo, kiu estis kun li, kaj
ili venis al la batalejo, kaj jen ili ekvidis, ke la glavo
de ĉiu frapas lian proksimulon kaj la konfuzo estas
tre granda. **21** Kaj la Hebreoj, kiuj estis kun la Filiŝtoj
antaŭe kaj venis kune kun ili en tendaro ĉirkaŭen, ili
ankaŭ aliĝis al la Izraelidoj, kiuj estis kun Saul kaj
Jonatan. **22** Kaj ĉiuj Izraelidoj, kiuj sin kaŝis sur la
monto de Efraim, aŭdis, ke la Filiŝtoj forkuras, kaj
ili ankaŭ aliĝis kontraŭ ili batale. **23** Kaj la Eternulo
helpis en tiu tago Izraelon; la batalo daŭris ĝis Bet-
Aven. **24** La Izraelidoj estis lacaj en tiu tago; sed Saul
ĵurligis la popolon, dirante: Malbenita estu tiu, kiu
manĝos panon antaŭ la vespero, antaŭ ol mi venĝos
al miaj malamikoj. Kaj la tuta popolo ne gustumis
panon. **25** Kaj ĉiuj venis en arbaron; kaj tie estis mielo
sur la tero. **26** Kiam la popolo venis en la arbaron,
ili vidis, ke jen fluas la mielo; sed neniu levis sian
manon al la buŝo, ĉar la popolo timis la ĵuron. **27** Sed
Jonatan ne aŭdis, kiam lia patro ĵurligis la popolon;
kaj li etendis la pinton de la bastono, kiu estis en lia
mano, kaj trempis ĝin en la mielĉelaro, kaj almetis
sian manon al la buŝo, kaj liaj okuloj revigliĝis. **28**
Tiam unu el la popolo ekparolis, kaj diris: Via patro
ĵurligis la popolon, dirante: Malbenita estu tiu, kiu
ion manĝos hodiaŭ; kaj la popolo laciĝis. **29** Tiam
Jonatan diris: Mia patro malgajigis la landon; rigardu,
kiel revigliĝis miaj okuloj, kiam mi gustumis iom
el ĉi tiu mielo. **30** Se la popolo manĝus hodiaŭ el
la militakiraĵo, kion ĝi prenis de siaj malamikoj kaj
kion ĝi trovis, ĉu nun ne pligrandiĝus la venkobato
kontraŭ la Filiŝtoj? **31** Kaj ili venkobatis en tiu tago la
Filiŝtojn de Miĥmaŝ ĝis Ajalon; kaj la popolo forte
laciĝis. **32** Kaj la popolo ĵetis sin sur la militakiraĵon;
kaj ili prenis ŝafojn kaj bovojn kaj bovidojn kaj buĉis
ilin sur la tero, kaj la popolo manĝis kune kun la
sango. **33** Oni raportis al Saul, dirante: Jen la popolo
pekas antaŭ la Eternulo, manĝante kun la sango. Kaj li
diris: Vi faris kontraŭleĝaĵon; rulu nun al mi grandan
ŝtonon. **34** Kaj Saul diris: Disiru en la popolon, kaj
diru al ĝi: Ĉiu alkonduku al mi sian bovon kaj sian
ŝafon, kaj buĉu ĝin ĉi tie kaj manĝu, kaj ne peku
antaŭ la Eternulo, manĝante kun la sango. Kaj ĉiu el
la popolo propramane alkondukis en tiu nokto sian
bovon kaj buĉis tie. **35** Kaj Saul konstruis altaron al la
Eternulo; tio estis la unua altaro, kiun li konstruis al
la Eternulo. **36** Kaj Saul diris: Ni postkuru la Filiŝtojn
en la nokto kaj ni prirabu ilin, ĝis eklumos la mateno,
kaj ni neniun restigu el ili. Kaj ili diris: Faru ĉion,
kio plaĉas al vi. Kaj la pastro diris: Ni turnu nin ĉi
tie al Dio. **37** Kaj Saul demandis Dion: Ĉu mi iru post
la Filiŝtoj? ĉu Vi transdonos ilin en la manojn de la
Izraelidoj? Sed Li ne respondis al li en tiu tago. **38**
Tiam Saul diris: Venu ĉi tien ĉiuj estroj de la popolo;
eksciu kaj vidu, en kio konsistis la peko hodiaŭ. **39**
Ĉar kiel vivas la Eternulo, la helpanto de Izrael: se la
kulpo estas en Jonatan, mia filo, li estos mortigita.
Sed neniu el la tuta popolo respondis al li. **40** Tiam li

diris al ĉiuj Izraelidoj: Vi estos sur unu flanko, kaj mi
kun mia filo Jonatan estos sur la dua flanko. Kaj la
popolo respondis al Saul: Faru tion, kio plaĉas al vi. 41
Kaj Saul diris al la Eternulo, Dio de Izrael: Montru,
kiu estas prava. Tiam estis trafitaj Jonatan kaj Saul,
sed la popolo eliris senkulpa. 42 Tiam Saul diris: Lotu
inter mi kaj mia filo Jonatan. Kaj trafita estis Jonatan.
43 Tiam Saul diris al Jonatan: Raportu al mi, kion vi
faris. Kaj Jonatan raportis al li kaj diris: Mi gustumis
per la pinto de la bastono, kiu estas en mia mano, iom
da mielo: nun mi mortu. 44 Kaj Saul diris: Dio faru tiel
kaj pli; Jonatan devas morti. 45 Sed la popolo diris al
Saul: Ĉu devas morti Jonatan, kiu faris tiun grandan
helpon al Izrael? ho, neniel! kiel vivas la Eternulo,
eĉ unu haro de lia kapo ne falu sur la teron, ĉar kun
Dio li agis hodiaŭ. Kaj la popolo liberigis Jonatanon,
kaj li ne mortis. 46 Kaj Saul foriris de la Filiŝtoj, kaj
la Filiŝtoj iris sur sian lokon. 47 Kaj Saul prenis en
siajn manojn la regadon super Izrael, kaj li militis
ĉirkaŭe kontraŭ ĉiuj siaj malamikoj, kontraŭ Moab kaj
kontraŭ la Amonidoj kaj kontraŭ Edom kaj kontraŭ la
reĝoj de Coba kaj kontraŭ la Filiŝtoj; kaj kien ajn li sin
direktis, li venkobatis. 48 Li aranĝis militistaron kaj
venkobatis Amalekon kaj liberigis Izraelon el la manoj
de liaj rabantoj. 49 La filoj de Saul estis: Jonatan kaj
Jiŝvi kaj Malki-Ŝua; kaj la nomoj de liaj du filinoj estis:
la nomo de la unuenaskita estis Merab, kaj la nomo de
la pli juna estis Miĥal. 50 Kaj la nomo de la edzino de
Saul estis Aĥinoam, filino de Aĥimaac; kaj la nomo de
lia militestro estis Abner, filo de Ner kaj onklo de Saul.
51 Kiŝ estis la patro de Saul; kaj Ner, patro de Abner,
estis filo de Abiel. 52 Forta estis la milito kontraŭ la
Filiŝtoj dum la tuta vivo de Saul. Kaj ĉiufoje, kiam Saul
vidis ian viron fortan kaj bravan, li prenis lin al si.

**15** Kaj Samuel diris al Saul: Min sendis la Eternulo,
por sanktolei vin kiel reĝon super Lia popolo,
super Izrael; aŭskultu do la voĉon de la vortoj de la
Eternulo. 2 Tiel diris la Eternulo Cebaot: Mi rememoris,
kion faris Amalek al Izrael, kiel li baris la vojon al
li, kiam ĉi tiu iris el Egiptujo. 3 Nun iru kaj frapu
Amalekon, kaj ekstermu ĉion, kion li havas; ne indulgu
lin, sed mortigu la virojn kaj virinojn, infanojn kaj
suĉinfanojn, bovojn kaj ŝafojn, kamelojn kaj azenojn.
4 Tiam Saul faris alvokon al la popolo, kaj li kalkulis
ilin en Telaim, tie estis ducent mil piedirantoj kaj
dek mil viroj el Jehuda. 5 Kaj Saul venis al la urbo de
Amalek kaj faris batalon ĉe la torento. 6 Kaj Saul diris
al la Kenidoj: Iru, deturnu vin kaj foriĝu el inter la
Amalekidoj, por ke mi ne ekstermu vin kune kun ili;
vi faris ja favorkoraĵon al ĉiuj Izraelidoj, kiam ili iris el
Egiptujo. Kaj la Kenidoj foriris el inter la Amalekidoj.
7 Kaj Saul venkobatis Amalekon de Ĥavila ĝis Ŝur, kiu
estas antaŭ Egiptujo. 8 Kaj li kaptis Agagon, reĝon de
Amalek, vivantan, sed la tutan popolon li ekstermis
per glavo. 9 Kaj Saul kaj la popolo indulgis Agagon
kaj la plej bonajn ŝafojn kaj bovojn kaj bovidojn
kaj ŝafidojn, kaj ĉion, kio estis bona, kaj ili ne volis
ekstermi ilin, sed ĉion senvaloran kaj neakceptindan
ili ekstermis. 10 Tiam la Eternulo ekparolis al Samuel,
dirante: 11 Mi bedaŭras, ke Mi faris Saulon reĝo;
ĉar li deturnis sin de Mi, kaj Miajn vortojn li ne
plenumis. Tio malĝojigis Samuelon, kaj li vokis al la
Eternulo dum la tuta nokto. 12 Kaj Samuel leviĝis
frue matene, por iri renkonte al Saul. Oni raportis al
Samuel, ke Saul venis al Karmel, ke li tie starigis al si
monumenton kaj poste turnis sin kaj foriris kaj venis
en Gilgalon. 13 Kiam Samuel venis al Saul, Saul diris al
li: Estu benita de la Eternulo; mi plenumis la diron de
la Eternulo. 14 Sed Samuel diris: Kion do signifas tiu
voĉo de ŝafoj en miaj oreloj, kaj la voĉo de bovoj, kiun
mi aŭdas? 15 Kaj Saul respondis: De la Amalekidoj
oni venigis ilin, ĉar la popolo indulgis la plej bonajn
ŝafojn kaj bovojn, por buĉoferi ilin al la Eternulo,
via Dio; la ceterajn ni ekstermis. 16 Sed Samuel diris
al Saul: Permesu, mi diros al vi, kion parolis al mi
la Eternulo en ĉi tiu nokto. Kaj tiu respondis al li:
Diru. 17 Kaj Samuel diris: Ĉu vi ne estis malgranda
en viaj okuloj, kaj tamen vi fariĝis estro de la triboj
de Izrael, kaj la Eternulo sanktoleis vin reĝo super
Izrael? 18 Kaj la Eternulo vojirigis vin, kaj diris: Iru
kaj ekstermu la pekulojn la Amalekidojn, kaj militu
kontraŭ ili, ĝis vi tute ekstermos ilin. 19 Kial do vi
ne obeis la voĉon de la Eternulo, sed direktiĝis al
militakiraĵo kaj faris la malbonon antaŭ la okuloj de
la Eternulo? 20 Kaj Saul diris al Samuel: Mi obeis la
voĉon de la Eternulo, kaj mi iris la vojon, sur kiun
sendis min la Eternulo, kaj mi venigis Agagon, reĝon
de Amalek, kaj la Amalekidojn mi ekstermis. 21 Kaj
la popolo prenis el la militakiraĵo ŝafojn kaj bovojn,
la plej bonan el la kondamnitaĵo, por buĉoferi al
la Eternulo, via Dio, en Gilgal. 22 Sed Samuel diris:
Ĉu bruloferoj kaj buĉoferoj estas tiel agrablaj al la
Eternulo, kiel la obeado al la voĉo de la Eternulo?

vidu, obeado estas pli bona ol buĉofero, atentado
estas pli bona ol la sebo de ŝafoj. 23 Ĉar malobeo estas
kiel peko de sorĉado, kaj neplenumo estas kiel peko
de idolservado. Pro tio, ke vi malŝatis la diron de la
Eternulo, Li malŝatis vin, ke vi ne estu plu reĝo. 24
Tiam Saul diris al Samuel: Mi pekis, ĉar mi malobeis
la diron de la Eternulo kaj viajn vortojn; mi timis la
popolon, kaj mi obeis ĝian voĉon. 25 Kaj nun pardonu,
mi petas, mian pekon, kaj iru kun mi returne, por ke
mi adorkliniĝu antaŭ la Eternulo. 26 Sed Samuel diris
al Saul: Mi ne iros kun vi returne; ĉar vi malŝatis la
diron de la Eternulo, tial la Eternulo malŝatis vin, ke
vi ne estu plu reĝo super Izrael. 27 Kaj kiam Samuel
deturnis sin por iri, li kaptis lin je la rando de lia
vesto, kaj ĝi disŝiriĝis. 28 Tiam Samuel diris al li: La
Eternulo forŝiris de vi hodiaŭ la regnon de Izrael, kaj
transdonis ĝin al via proksimulo, kiu estas pli bona
ol vi. 29 Kaj la Potenculo de Izrael ne ŝanĝos Sian
decidon kaj ne pentos; ĉar Li ne estas homo, ke Li
pentu. 30 Kaj tiu diris: Mi pekis; sed nun, mi vin petas,
faru al mi honoron antaŭ la plejaĝuloj de mia popolo
kaj antaŭ Izrael, reiru kun mi, por ke mi adorkliniĝu
antaŭ la Eternulo, via Dio. 31 Tiam Samuel reiris
post Saul, kaj Saul adorkliniĝis antaŭ la Eternulo. 32
Kaj Samuel diris: Alkonduku al mi Agagon, reĝon de
Amalek; kaj venis al li Agag en katenoj, kaj Agag diris:
Ho, alproksimiĝas la maldolĉeco de la morto. 33 Kaj
Samuel diris: Kiel via glavo seninfanigis virinojn, via
patrino fariĝos seninfana inter la virinoj. Kaj Samuel
dishakis Agagon antaŭ la Eternulo en Gilgal. 34 Kaj
Samuel foriris en la direkto al Rama, kaj Saul iris
al sia domo en Gibea de Saul. 35 Kaj Samuel ne plu
vidis Saulon ĝis la tago de sia morto; tamen Samuel
funebris pri Saul; kaj la Eternulo bedaŭris, ke Li faris
Saulon reĝo super Izrael.

**16** Kaj la Eternulo diris al Samuel: Kiel longe vi
funebros pri Saul, kiun Mi trovis nedigna reĝi
super Izrael? plenigu vian kornon per oleo, kaj iru; Mi
sendos vin al Jiŝaj la Bet-Leĥemano, ĉar inter liaj filoj
Mi elvidis al Mi reĝon. 2 Kaj Samuel diris: Kiel mi iros?
Saul aŭdos, kaj mortigos min. Sed la Eternulo diris:
Prenu kun vi bovidinon, kaj diru: Mi venis, por fari
buĉoferon al la Eternulo. 3 Kaj invitu Jiŝajon al la ofero;
kaj Mi sciigos al vi, kion vi devas fari, kaj vi sanktoleos
al Mi tiun, kiun Mi montros al vi. 4 Kaj Samuel faris
tion, kion diris la Eternulo, kaj li venis Bet-Leĥemon.
Kun timo iris al li renkonte la plejaĝuloj de la urbo,
kaj diris: Ĉu en paco vi venas? 5 Kaj li respondis: En
paco; mi venis, por buĉoferi al la Eternulo; sanktigu
vin, kaj venu kun mi por la buĉofero. Kaj li sanktigis
Jiŝajon kaj liajn filojn, kaj invitis ilin al la ofero. 6
Kiam ili venis, li ekvidis Eliabon, kaj diris: Jen antaŭ
la Eternulo estas Lia sanktoleito. 7 Sed la Eternulo
diris al Samuel: Ne rigardu lian aspekton kaj lian
altan kreskon, ĉar Mi malŝatas lin; ne estas tiel, kiel
vidas homo: ĉar homo vidas tion, kio estas antaŭ la
okuloj, sed la Eternulo rigardas en la koron. 8 Tiam
Jiŝaj vokis Abinadabon, kaj pasigis lin antaŭ Samuel;
sed ĉi tiu diris: Ankaŭ ĉi tiun la Eternulo ne elektis. 9
Kaj Jiŝaj pasigis Ŝaman; sed Samuel diris: Ankaŭ ĉi
tiun la Eternulo ne elektis. 10 Tiel Jiŝaj pasigis siajn
sep filojn antaŭ Samuel; sed Samuel diris al Jiŝaj: La
Eternulo ne elektis ĉi tiujn. 11 Kaj Samuel diris al
Jiŝaj: Ĉu tio estas jam ĉiuj knaboj? Kaj ĉi tiu diris:
Restas ankoraŭ la plej juna, li paŝtas nun la ŝafojn.
Kaj Samuel diris al Jiŝaj: Sendu, kaj venigu lin, ĉar ni
ne sidiĝos al la tablo, antaŭ ol li venos ĉi tien. 12 Kaj
li sendis, kaj venigis lin. Kaj li estis ruĝa, kun belaj
okuloj kaj bonaspekta. Tiam la Eternulo diris: Leviĝu,
sanktoleu lin, ĉar tio estas li. 13 Kaj Samuel prenis la
kornon kun la oleo, kaj sanktoleis lin inter liaj fratoj.
Kaj la spirito de la Eternulo ekfavoris Davidon de
post tiu tago kaj pluen. Kaj Samuel leviĝis kaj iris en
Raman. 14 Kaj la spirito de la Eternulo foriĝis de Saul,
kaj ekturmentis lin spirito malbona, sendita de la
Eternulo. 15 Kaj la servantoj de Saul diris al li: Jen
malbona spirito, sendita de Dio, turmentas vin; 16
tial nia sinjoro diru al siaj servantoj, ke ili elserĉu
homon, kiu povoscias ludi harpon: kaj kiam atakos vin
la malbona spirito, sendita de Dio, li ekludos per sia
mano, kaj tiam fariĝos al vi bone. 17 Kaj Saul diris al
siaj servantoj: Elserĉu al mi homon, kiu bone ludas, kaj
venigu lin al mi. 18 Tiam unu el la junuloj respondis
kaj diris: Ĉe Jiŝaj la Bet-Leĥemano mi vidis filon, kiu
povoscias ludi, kaj li estas fortulo kaj militkapablulo
kaj prudenta en siaj paroloj kaj belaspekta, kaj la
Eternulo estas kun li. 19 Kaj Saul sendis senditojn
al Jiŝaj, kaj dirigis: Sendu al mi vian filon David, kiu
estas ĉe la ŝafoj. 20 Tiam Jiŝaj prenis azenon, ŝarĝitan
per pano, kaj felsakon kun vino, kaj unu kapridon, kaj
li sendis tion per sia filo David al Saul. 21 Kaj David
venis al Saul, kaj ekservis antaŭ li; kaj ĉi tiu tre ekamis
lin, kaj li fariĝis lia armilportisto. 22 Kaj Saul sendis al

Jiŝaj, por diri: Mi petas, David restu ĉe mi, ĉar li plaĉas
al mi. 23 Kaj ĉiufoje, kiam la spirito, sendita de Dio,
atakis Saulon, David prenadis la harpon kaj ludadis
per sia mano; tiam al Saul fariĝadis pli facile kaj bone,
kaj la malbona spirito foriĝadis de li.

**17** La Filiŝtoj kolektis siajn militistarojn por milito,
kaj kuniĝis apud Soĥo de Jehuda, kaj stariĝis
tendare inter Soĥo kaj Azeka, en Efes-Damim. 2 Kaj
Saul kaj la viroj de Izrael kolektiĝis, kaj stariĝis tendare
en la valo de Ela, kaj pretigis sin por batalo kontraŭ la
Filiŝtoj. 3 La Filiŝtoj staris sur la monto unuflanke,
kaj la Izraelidoj staris sur la monto duaflanke, kaj
la valo estis inter ili. 4 Kaj eliris grandegulo el la
tendaroj de la Filiŝtoj; lia nomo estis Goljat, el Gat; lia
alteco estis ses ulnoj kaj unu manlarĝo. 5 Kaj kupra
kasko estis sur lia kapo, kaj per skvamita kiraso li estis
vestita, kaj la pezo de la kiraso estis kvin mil sikloj da
kupro. 6 Kaj kupraj armaĵetoj estis sur liaj piedoj, kaj
kupra ŝildo sur liaj ŝultroj. 7 La tenilo de lia lanco
estis kiel rultrabo de teksisto, kaj la fero de lia lanco
havis la pezon de sescent sikloj da fero; kaj antaŭ
li iris ŝildoportisto. 8 Kaj li stariĝis, kaj ekkriis al la
taĉmentoj de Izrael, kaj diris al ili: Por kio vi eliris
batale? ĉu mi ne estas Filiŝto, kaj vi sklavoj de Saul?
elektu inter vi viron, kaj li malsupreniru al mi. 9 Se li
povos batali kun mi kaj venkos min, tiam ni estos viaj
sklavoj; sed se mi lin venkos kaj batos, tiam vi estos
niaj sklavoj kaj vi servos al ni. 10 Kaj la Filiŝto diris:
Mi hontigos hodiaŭ la taĉmentojn de Izrael; donu
al mi viron, ke ni ambaŭ interbatalu. 11 Kiam Saul
kaj ĉiuj Izraelidoj aŭdis la vortojn de tiu Filiŝto, ili
eksentis teruron kaj tre ektimis. 12 Estis David, filo
de tiu Efratano el Bet-Leĥem de Jehuda, kies nomo
estis Jiŝaj kaj kiu havis ok filojn; kaj tiu viro en la
tempo de Saul estis jam maljuna, profundaĝa inter la
viroj. 13 La tri plej maljunaj filoj de Jiŝaj iris, sekvante
Saulon, en la militon; la nomoj de liaj tri filoj, kiuj iris
en la militon, estis: Eliab, la unuenaskito, kaj la dua
post li Abinadab, kaj la tria Ŝama. 14 David estis la
plej juna; kaj la tri plej maljunaj iris post Saul. 15 Sed
David venadis al Saul kaj reiradis de li, por paŝti la
ŝafojn de sia patro en Bet-Leĥem. 16 La Filiŝto eliradis
matene kaj vespere, kaj stariĝadis dum kvardek tagoj.
17 Kaj Jiŝaj diris al sia filo David: Prenu por viaj fratoj
ĉi tiun efon da rostitaj grajnoj kaj ĉi tiujn dek panojn,
kaj kuru en la tendaron al viaj fratoj; 18 kaj ĉi tiujn
dek fromaĝojn alportu al la milestro, kaj rigardu, kiel
fartas viaj fratoj, kaj prenu ilian komision. 19 Kaj
Saul kaj ili kaj ĉiuj viroj de Izrael estis en la valo de
Ela, militante kontraŭ la Filiŝtoj. 20 Kaj David leviĝis
frue matene, lasis la ŝafojn al la gardisto, prenis la
portotaĵon kaj iris, kiel ordonis al li Jiŝaj, kaj venis al
la tendaro, kiam la militistaro eliris por sin aranĝi
kaj oni trumpetis por batalo. 21 Kaj aranĝis sin la
Izraelidoj kaj la Filiŝtoj, fronton kontraŭ fronto. 22
David lasis la vazojn, kiujn li portis, ĉe la gardisto de
ilaroj, kuris al la fronto, kaj demandis pri la farto de
siaj fratoj. 23 Dum li parolis kun ili, jen la grandegulo,
Goljat la Filiŝto estis lia nomo, el Gat, eliris el la vicoj
de la Filiŝtoj kaj komencis paroli kiel antaŭe; kaj David
tion aŭdis. 24 Kaj ĉiuj Izraelidoj, ekvidinte tiun viron,
forkuris de li kaj tre timis. 25 Kaj la Izraelidoj diris: Ĉu
vi vidis tiun viron, kiu tiel sin levas? por moki Izraelon
li sin levas; kiu lin venkobatos, tiun la reĝo riĉigos
per granda riĉeco, kaj sian filinon li donos al li, kaj la
domon de lia patro li faros libera en Izrael. 26 Tiam
David diris al la homoj, kiuj staris apud li: Kio estos
farita al la homo, kiu venkobatos tiun Filiŝton kaj
deprenos de Izrael la malhonoron? ĉar kiu estas tiu
necirkumcidita Filiŝto, ke li mokas la militistaron de
la vivanta Dio? 27 Kaj la popolo diris al li kiel antaŭe:
Tio estos farita al la homo, kiu venkobatos lin. 28 Kiam
lia plej maljuna frato Eliab aŭdis, kiel li parolas kun la
homoj, ekflamis la kolero de Eliab kontraŭ David, kaj
li diris: Por kio vi venis? kaj sub kies zorgado vi lasis
tiun malgrandan ŝafaron en la dezerto? mi konas vian
arogantecon kaj vian malbonan koron; vi venis nur
por vidi la batalon. 29 Tiam David diris: Kion do mi
nun faris? ĉu mi venis sen bezono? 30 Kaj li deturnis
sin de li al alia flanko, kaj ekparolis kiel antaŭe; kaj la
homoj respondis al li kiel la unuan fojon. 31 Kiam oni
aŭdis la vortojn, kiujn diris David, oni raportis al Saul,
kaj ĉi tiu venigis lin. 32 Kaj David diris al Saul: Neniu
perdu la kuraĝon pro li: via sklavo iros kaj batalos
kontraŭ tiu Filiŝto. 33 Sed Saul diris al David: Vi ne
povas iri kontraŭ tiun Filiŝton, por batali kontraŭ li;
ĉar vi estas knabo, kaj li estas batalisto detempe de
siaj plej junaj jaroj. 34 Tiam David diris al Saul: Via
sklavo estis ĉe sia patro paŝtanto de ŝafoj; kaj venadis
leono aŭ urso kaj forportadis ŝafon el la ŝafaro; 35
tiam mi kuradis post tiu, batadis ĝin, kaj savadis el
ĝia buŝo; se ĝi stariĝis kontraŭ mi, mi kaptis ĝin je la
makzelo, batis kaj mortigis ĝin. 36 Kiel la leonon, tiel

ankaŭ la urson via sklavo venkobatis; ankaŭ kun ĉi
tiu necirkumcidita Filiŝto estos la sama afero, kiel
kun ĉiu el tiuj, ĉar li malhonoras la militistaron de
la vivanta Dio. 37 Kaj David diris: La Eternulo, kiu
savis min kontraŭ leono kaj kontraŭ urso, savos min
kontraŭ ĉi tiu Filiŝto. Tiam Saul diris al David: Iru, kaj
la Eternulo estu kun vi. 38 Kaj Saul vestis Davidon per
siaj vestoj, kaj metis kupran kaskon sur lian kapon,
kaj vestis lin per kiraso. 39 Kaj David zonis lian glavon
supre de siaj vestoj, kaj provis iri, ĉar li ne kutimis;
sed David diris al Saul: Mi ne povas iri en ĉi tio, ĉar
mi ne kutimis. Kaj David demetis tion de si. 40 Kaj li
prenis sian bastonon en sian manon, kaj elektis al si
kvin glatajn ŝtonojn el la torento, kaj metis ilin en
la paŝtistan vazon, kiun li havis, kaj en la saketon,
kaj kun la ĵetilo en la mano li iris al la Filiŝto. 41 Kaj
la Filiŝto eliris kaj komencis alproksimiĝi al David,
kaj lia ŝildoportisto iris antaŭ li. 42 Kiam la Filiŝto
ekrigardis kaj vidis Davidon, li malŝatis lin, ĉar li
estis knabo, ruĝvanga kaj belaspekta. 43 Kaj la Filiŝto
diris al David: Ĉu mi estas hundo, ke vi iras al mi
kun bastono? Kaj la Filiŝto malbenis Davidon per siaj
dioj. 44 Kaj la Filiŝto diris al David: Venu al mi, por ke
mi donu vian karnon al la birdoj de la ĉielo kaj al la
bestoj de la kampo. 45 Sed David diris al la Filiŝto: Vi
iras kontraŭ min kun glavo, lanco, kaj ŝildo; kaj mi
iras kontraŭ vin en la nomo de la Eternulo Cebaot, la
Dio de la militistaro de Izrael, kiun vi malhonoris. 46
Hodiaŭ la Eternulo transdonos vin en mian manon,
ke mi venkobatu vin kaj deprenu de vi vian kapon,
kaj por ke mi donu hodiaŭ la kadavrojn de la Filiŝtaj
taĉmentoj al la birdoj de la ĉielo kaj al la bestoj de la
tero, por ke eksciu la tuta tero, ke Izrael havas Dion. 47
Kaj ekscios ĉi tiu tuta komunumo, ke ne per glavo kaj
lanco savas la Eternulo, ĉar de la Eternulo dependas la
milito, kaj Li transdonos vin en niajn manojn. 48 Kaj
kiam la Filiŝto leviĝis kaj ekiris, por alproksimiĝi al
David, tiam David rapide ekkuris al la fronto kontraŭ
la Filiŝton. 49 Kaj David etendis sian manon al la vazo,
kaj prenis el tie ŝtonon, ĵetis per la ĵetilo kaj trafis
la Filiŝton en lian frunton, kaj la ŝtono penetris en
lian frunton, kaj li falis kun la vizaĝo sur la teron.
50 Tiamaniere David venkis la Filiŝton per la ĵetilo
kaj per la ŝtono, kaj batis la Filiŝton kaj mortigis lin,
kvankam glavo ne estis en la mano de David. 51 David
alkuris, stariĝis super la Filiŝto, prenis lian glavon,
elprenis ĝin el la ingo, kaj mortigis lin, kaj dehakis per
ĝi lian kapon. Kiam la Filiŝtoj vidis, ke ilia fortegulo
mortis, ili forkuris. 52 Tiam leviĝis la viroj de Izrael
kaj Jehuda, kaj ekkriis, kaj postkuris la Filiŝtojn ĝis la
eniro en la valon kaj ĝis la pordego de Ekron. Kaj falis
la mortigitoj el la Filiŝtoj sur la vojo al Ŝaaraim, ĝis
Gat kaj ĝis Ekron. 53 Kaj la Izraelidoj revenis de la
kurado post la Filiŝtoj kaj disrabis ilian tendaron. 54
Kaj David prenis la kapon de la Filiŝto, kaj alportis ĝin
en Jerusalemon, kaj liajn armilojn li metis en sian
tendon. 55 Kiam Saul vidis Davidon, elirantan kontraŭ
la Filiŝton, li diris al Abner, la militestro: Kies filo
estas ĉi tiu junulo, Abner? Kaj Abner respondis: Mi
ĵuras per via animo, ho reĝo, ke mi ne scias. 56 Kaj
la reĝo diris: Demandu, kies filo estas ĉi tiu junulo.
57 Kiam David revenis post la mortigo de la Filiŝto,
Abner prenis lin kaj venigis lin antaŭ Saulon, kaj la
kapo de la Filiŝto estis en lia mano. 58 Kaj Saul diris al
li: Kies filo vi estas, junulo? Kaj David respondis: Filo
de via sklavo Jiŝaj, la Bet-Leĥemano.

18 Kiam li finis la paroladon kun Saul, la animo
de Jonatan alligiĝis al la animo de David, kaj
Jonatan ekamis lin kiel sian animon. 2 Kaj Saul prenis
lin en tiu tago, kaj ne lasis lin reiri al la domo de sia
patro. 3 Kaj Jonatan faris kun David interligon, ĉar li
ekamis lin kiel sian animon. 4 Kaj Jonatan deprenis
la tunikon, kiu estis sur li, kaj donis ĝin al David,
ankaŭ siajn militajn vestojn, inkluzive sian glavon,
sian pafarkon, kaj sian zonon. 5 Kaj David iradis ĉien,
kien sendis lin Saul, kaj agadis prudente; kaj Saul faris
lin estro de la militistoj, kaj tio plaĉis al la tuta popolo
kaj ankaŭ al la servantoj de Saul. 6 Okazis, ke dum
ilia revenado, kiam David revenis post la mortigo
de la Filiŝto, eliris la virinoj el ĉiuj urboj de Izrael,
kantante kaj dancante, renkonte al la reĝo Saul, kun
tamburinoj, ĝojkrioj, kaj cimbaloj. 7 Kaj la ludantaj
virinoj kantis unuj al la aliaj, kaj diris: Saul frapis
milojn, Kaj David dekmilojn. 8 Kaj tio tre kolerigis
Saulon kaj ne plaĉis al li, kaj li diris: Ili donis al David
dekmilojn, kaj al mi ili donis milojn; nun mankas al
li ankoraŭ nur la reĝeco. 9 De tiu tago kaj plue Saul
malamike rigardadis Davidon. 10 En la morgaŭa tago
okazis, ke la malbona spirito, sendita de Dio, atakis
Saulon, kaj li furiozis en sia domo, kaj David ludis per
sia mano, kiel ĉiutage, kaj en la mano de Saul estis
lanco. 11 Kaj Saul ĵetis la lancon, kaj pensis: Mi alpikos
Davidon al la muro. Sed David forturnis sin de li du

fojojn. 12 Tiam Saul ektimis Davidon, ĉar la Eternulo
estis kun li, kaj de Saul Li Sin forturnis. 13 Kaj Saul
forigis lin de si kaj faris lin milestro, kaj li iradis kaj
venadis antaŭ la popolo. 14 Kaj David estis prudenta
en ĉiuj siaj agoj, kaj la Eternulo estis kun li. 15 Kaj
Saul vidis, ke li agas tre prudente, kaj li timis lin. 16
Sed la tuta Izrael kaj Jehuda amis Davidon pro tio,
kiamaniere li iradis kaj venadis antaŭ ili. 17 Kaj Saul
diris al David: Jen estas mia pliaĝa filino Merab, mi
donos ŝin al vi kiel edzinon; nur estu al mi kuraĝa kaj
konduku la militojn de la Eternulo. Ĉar Saul pensis:
Mia mano lin ne tuŝu, sed li pereu de la manoj de la
Filiŝtoj. 18 Sed David diris al Saul: Kiu mi estas, kaj
kia estas la vivo de la familio de mia patro en Izrael,
ke mi fariĝu bofilo de la reĝo? 19 Tamen, kiam venis
la tempo, ke Merab, la filino de Saul, estu donata
al David, ŝi estis fordonita kiel edzino al Adriel, la
Meĥolatano. 20 Dume Miĥal, filino de Saul, ekamis
Davidon, kaj oni diris tion al Saul, kaj la afero plaĉis al
li. 21 Kaj Saul pensis: Mi donos ŝin al li, por ke ŝi fariĝu
por li falilo, kaj por ke trafu lin la manoj de la Filiŝtoj.
Kaj Saul diris al David: Per la dua filino fariĝu nun
mia bofilo. 22 Kaj Saul ordonis al siaj servantoj: Parolu
al David sekrete, kaj diru: Jen la reĝo vin favoras,
kaj ĉiuj liaj servantoj vin amas; boparenciĝu do nun
kun la reĝo. 23 Kaj la servantoj de Saul diris tiujn
vortojn al David; sed David diris: Ĉu vi opinias, ke
estas afero facila boparenciĝi kun la reĝo? mi estas ja
homo malriĉa kaj ne eminenta. 24 Kaj la servantoj de
Saul raportis al li, dirante: Tiajn vortojn diris David.
25 Tiam Saul diris: Tiamaniere diru al David: La reĝo
ne deziras alian edziĝan donacon krom cent prepucioj
de Filiŝtoj, por venĝi al la malamikoj de la reĝo. Kaj
Saul esperis faligi Davidon per la manoj de la Filiŝtoj.
26 Kaj liaj servantoj diris al David tiujn vortojn, kaj
al David plaĉis la afero, ke li boparenciĝos kun la
reĝo. Kaj antaŭ ol venis la destinita tempo, 27 David
leviĝis kaj iris kun siaj viroj kaj mortigis el la Filiŝtoj
ducent virojn, kaj David alportis iliajn prepuciojn en
plena nombro al la reĝo, por boparenciĝi kun la reĝo.
Kaj Saul donis al li sian filinon Miĥal kiel edzinon.
28 Kaj Saul vidis kaj komprenis, ke la Eternulo estas
kun David, kaj ke Miĥal, la filino de Saul, lin amas.
29 Tiam Saul ankoraŭ pli ektimis Davidon, kaj Saul
fariĝis malamiko de David por ĉiam. 30 La estroj de la
Filiŝtoj eliradis, kaj ĉiufoje, kiam ili eliris, David agis
pli prudente ol ĉiuj servantoj de Saul, kaj lia nomo
fariĝis tre glora.

19 Saul diris al sia filo Jonatan kaj al ĉiuj siaj
servantoj, ke ili mortigu Davidon. 2 Sed Jonatan,
filo de Saul, tre amis Davidon. Kaj Jonatan sciigis
al David, dirante: Mia patro Saul intencas mortigi
vin; tial gardu vin, mi petas, morgaŭ matene: iru
en sekretan lokon kaj kaŝu vin. 3 Kaj mi eliros kaj
stariĝos apud mia patro sur tiu kampo, kie vi estos,
kaj mi parolos pri vi al mia patro; kaj kiam mi vidos,
kiel la afero staras, mi diros al vi. 4 Kaj Jonatan
parolis pri David bonon al sia patro Saul, kaj diris al li:
La reĝo ne peku kontraŭ sia sklavo David, ĉar li ne
pekis kontraŭ vi kaj ĉar liaj agoj estas tre bonaj por
vi; 5 li riskis sian vivon kaj mortigis la Filiŝton, kaj
la Eternulo faris grandan savon al la tuta Izrael; vi
tion vidis, kaj vi ĝojis; kial do vi volas peki kontraŭ
senkulpa sango kaj mortigi Davidon senkaŭze? 6 Kaj
Saul aŭskultis la voĉon de Jonatan, kaj Saul ĵuris: Mi
ĵuras per la Eternulo, li ne mortos. 7 Tiam Jonatan
alvokis Davidon, kaj Jonatan rakontis al li ĉion ĉi
tion; kaj Jonatan alkondukis Davidon al Saul, ke li
estu antaŭ ĉi tiu kiel antaŭe. 8 Komenciĝis denove
milito; kaj David eliris kaj batalis kontraŭ la Filiŝtoj,
kaj frapis ilin per granda frapo, kaj ili forkuris de
li. 9 Sed la malbona spirito, sendita de la Eternulo,
denove venis sur Saulon, kiam li sidis en sia domo
kaj lia lanco estis en lia mano kaj David ludis per la
mano. 10 Kaj Saul intencis alpiki per la lanco Davidon
al la muro; sed David forsaltis de Saul, kaj la lanco
enpikiĝis en la muron, kaj David forkuris kaj saviĝis
en tiu nokto. 11 Tiam Saul sendis senditojn al la domo
de David, por fari gardon kontraŭ li kaj mortigi lin
matene. Sed al David diris lia edzino Miĥal jene: Se
vi ne savos vian animon en ĉi tiu nokto, vi morgaŭ
estos mortigita. 12 Kaj Miĥal malsuprenigis Davidon
per la fenestro, kaj li foriris, forkuris, kaj saviĝis. 13
Poste Miĥal prenis doman dion, metis ĝin sur la liton,
ĉirkaŭ ĝian kapon ŝi metis tapiŝon el kapra felo, kaj
kovris ĝin per vesto. 14 Kiam Saul sendis senditojn,
por preni Davidon, ŝi diris: Li estas malsana. 15 Saul
sendis la senditojn, ke ili rigardu Davidon, kaj li diris
al ili: Alportu lin al mi kun la lito, por ke oni mortigu
lin. 16 La senditoj venis, kaj vidis, ke sur la lito estas
doma dio kaj ĉirkaŭ ĝia kapo estas tapiŝo el kapra
felo. 17 Kaj Saul diris al Miĥal: Kial vi tiel trompis min

kaj foririgis mian malamikon, ke li saviĝu? Kaj Miĥal
diris al Saul: Li diris al mi: Foririgu min, ĉar alie mi
vin mortigos. 18 Dume David forkuris kaj saviĝis, kaj
venis al Samuel en Raman, kaj rakontis al li ĉion, kion
faris al li Saul. Kaj li kaj Samuel iris kaj restis en Najot.
19 Kaj oni raportis al Saul, dirante: Jen David estas
nun en Najot, en la regiono de Rama. 20 Tiam Saul
sendis senditojn, por preni Davidon. Sed ili ekvidis
aron da profetoj, kiuj estis profetantaj, kaj Samuelon,
kiu staris super ili; kaj venis sur la senditojn de Saul
la spirito de Dio, kaj ili ankaŭ ekprofetis. 21 Kiam
oni tion raportis al Saul, li sendis aliajn senditojn;
sed ankaŭ ili ekprofetis. Kaj Saul plue sendis triajn
senditojn, sed ankaŭ ili ekprofetis. 22 Tiam li mem iris
en Raman, kaj venis al la granda puto, kiu estas en
Seĥu, kaj demandis: Kie estas Samuel kaj David? Kaj
oni respondis: En Najot, en la regiono de Rama. 23
Kaj li iris tien, en Najoton en la Rama regiono; sed
tiam ankaŭ sur lin venis la spirito de Dio, kaj li iris
ĉiam profetante, ĝis li venis en Najoton en la Rama
regiono. 24 Kaj li ankaŭ demetis siajn vestojn, kaj li
ankaŭ profetis antaŭ Samuel, kaj li kuŝis senveste
dum tiu tuta tago kaj dum la tuta nokto. Tial oni
diras: Ĉu ankaŭ Saul estas inter la profetoj?

20 Sed David forkuris el Najot en la Rama regiono,
kaj venis, kaj diris al Jonatan: Kion mi faris?
kio estas mia krimo? kaj kio estas mia peko antaŭ
via patro, ke li volas forpreni mian animon? 2 Sed
tiu diris al li: Tio certe ne fariĝos, vi ne mortos; mia
patro faras nenian aferon grandan aŭ malgrandan, ne
sciigante tion al mi; kial do mia patro kaŝus antaŭ mi
ĉi tiun aferon? tio ne fariĝos. 3 Tiam David plue ĵuris
kaj diris: Via patro scias bone, ke vi favoras min, tial li
diris al si: Jonatan ne devas scii ĉi tion, por ke li ne
afliktiĝu; vere, kiel vivas la Eternulo kaj kiel vivas via
animo, inter mi kaj la morto estas nur unu paŝo. 4
Kaj Jonatan diris al David: Kion ajn via animo diros,
tion mi faros por vi. 5 Tiam David diris al Jonatan:
Jen morgaŭ estos monatkomenco, kaj mi devas sidi
kun la reĝo ĉe la tagmanĝo; permesu, ke mi foriru kaj
kaŝu min sur la kampo ĝis vespero de la tria tago. 6
Se via patro demandos pri mi, tiam diru: David forte
petis min, ke li kuru al sia urbo Bet-Leĥem, ĉar tie
estas ĉiujara oferado de la tuta familio. 7 Se li diros:
Bone, tiam estos paco al via sklavo; sed se li ekkoleros,
tiam sciu, ke malbono jam estas decidita de li. 8 Faru
do favorkoraĵon al via sklavo, ĉar vi akceptis vian
sklavon kun vi en interligon antaŭ la Eternulo; kaj se
mi havas sur mi ian kulpon, tiam mortigu min vi; sed
por kio vi venigus min al via patro? 9 Sed Jonatan
diris: Neniam tio fariĝu al vi, ke mi scius, ke mia patro
decidis malbonon kontraŭ vi, kaj mi ne sciigus tion al
vi. 10 Kaj David diris al Jonatan: Kiu diros al mi, se via
patro donos al vi respondon kruelan? 11 Jonatan diris
al David: Venu, ni eliros sur la kampon. Kaj ambaŭ
eliris sur la kampon. 12 Tiam Jonatan diris al David:
La Eternulo, Dio de Izrael, se mi esploros mian patron
ĝis postmorgaŭ, kaj konvinkiĝos, ke li estas favora al
David, kaj se mi tiam ne sendos al vi kaj ne malkaŝos
al viaj oreloj — 13 tiam la Eternulo punu kaj repunu
Jonatanon. Sed se al mia patro plaĉos io malbona
kontraŭ vi, tion mi ankaŭ malkaŝos al viaj oreloj, kaj
mi forliberigos vin, ke vi iru en paco; kaj la Eternulo
estu kun vi, kiel Li estis kun mia patro. 14 Kaj se mi
ankoraŭ vivos, ĉu vi ne agos kun mi favorkore, ke
mi ne mortu? 15 Kaj vian favorkorecon ne fortiru
de mia domo eterne, eĉ ne tiam, kiam la Eternulo
ekstermos ĉiujn malamikojn de David de sur la tero.
16 Tiamaniere faris Jonatan interligon kun la domo de
David, se la Eternulo punos la malamikojn de David.
17 Kaj Jonatan plue ĵuris al David pri sia amo al li, ĉar
li amis lin kiel sian animon. 18 Kaj Jonatan diris al li:
Morgaŭ estos komenco de monato, kaj oni demandos
pri vi, ĉar oni rimarkos vian sidlokon. 19 En la tria
tago rapidu kaj venu al la loko, kie vi kaŝis vin dum la
labora tago, kaj vi sidos apud la ŝtono Ezel. 20 Kaj mi
pafos preter ĝin tri sagojn, kvazaŭ pafante al celo.
21 Kaj poste mi sendos junulon, dirante: Iru, trovu
la sagojn. Se mi diros al la junulo: Jen la sagoj estas
antaŭ vi, prenu ilin kaj venu — tiam estas paco al
vi kaj nenio minacas, kiel vivas la Eternulo. 22 Sed
se mi tiel diros al la junulo: Jen la sagoj estas post
vi malproksime — tiam foriru, ĉar la Eternulo vin
forsendas. 23 Kaj koncerne tion, kion parolis inter ni
mi kaj vi, la Eternulo estu inter mi kaj vi por ĉiam.
24 Tiam David kaŝis sin sur la kampo. Kaj kiam estis
la monatkomenco, la reĝo sidiĝis al tagmanĝo; 25
kaj kiam la reĝo sidiĝis sur sia loko, kiel ĉiufoje, sur
la sidloko apud la muro, Jonatan leviĝis, kaj Abner
sidiĝis apud Saul, kaj la loko de David restis neokupita.
26 Sed Saul diris nenion en tiu tago, ĉar li pensis: Io
okazis al li, verŝajne li estas malpura, li ne puriĝis.
27 Estis la dua tago de la monatkomenco, kaj la loko

de David restis neokupita. Tiam Saul diris al sia filo
Jonatan: Kial la filo de Jiŝaj ne venis hieraŭ nek hodiaŭ
al la tagmanĝo? 28 Kaj Jonatan respondis al Saul:
David forte petis min, ke li iru Bet-Leĥemon, 29 kaj li
diris: Forliberigu min, ĉar ni havas en la urbo familian
oferadon, kaj mia frato ordonis al mi esti tie; tial nun,
se vi estas favora al mi, permesu, ke mi rapidu tien
kaj ke mi vidu miajn fratojn. Tial li ne venis al la tablo
de la reĝo. 30 Tiam ekflamis la kolero de Saul kontraŭ
Jonatan, kaj li diris al li: Ho, filo de obstina virino! ĉu
mi ne scias, ke vi elektis al vi la filon de Jiŝaj, por via
malhonoro kaj por la malhonoro de via patrino? 31
Ĉar tiel longe, kiel la filo de Jiŝaj vivos sur la tero, ne
fortikiĝos vi nek via regno. Nun sendu, kaj venigu
lin al mi, ĉar li meritas la morton. 32 Sed Jonatan
respondis al sia patro Saul kaj diris al li: Pro kio oni
mortigu lin? kion li faris? 33 Tiam Saul ĵetis sur lin la
lancon, por frapi lin. Tiam Jonatan komprenis, ke ĉe
lia patro ĝi estas afero decidita, mortigi Davidon. 34
Kaj Jonatan en forta kolero levis sin de ĉe la tablo; kaj
li nenion manĝis en tiu dua tago de la monatkomenco;
ĉar li malĝojis pro David, ke lia patro tiel insultis lin.
35 En la sekvanta mateno Jonatan eliris sur la kampon
en la tempo interkonsentita kun David, kaj malgranda
knabo estis kun li. 36 Kaj li diris al sia knabo: Kuru,
trovu la sagojn, kiujn mi pafas. La knabo kuris, kaj li
pafĵetis la sagon malproksime trans lin. 37 Kiam la
knabo venis al la loko, kien Jonatan pafĵetis la sagon,
Jonatan ekkriis al la junulo, dirante: La sago kuŝas ja
post vi malproksime. 38 Kaj Jonatan kriis al la knabo:
Tuj, rapidu, ne staru. Kaj la knabo de Jonatan kolektis
la sagojn kaj venis al sia sinjoro. 39 Kaj la knabo
nenion sciis; nur Jonatan kaj David sciis la aferon. 40
Jonatan fordonis siajn armilojn al la knabo, kiu estis
ĉe li, kaj diris al li: Iru, portu en la urbon. 41 Kiam la
knabo foriris, David leviĝis de la suda flanko, ĵetis
sin vizaĝaltere, kaj salutis tri fojojn; kaj ili kisis sin
reciproke, kaj ploris ambaŭ kune, sed David pli. 42 Kaj
Jonatan diris al David: Iru en paco, kiel ni ĵuris ambaŭ
per la nomo de la Eternulo, dirante: La Eternulo estu
inter mi kaj vi, inter mia idaro kaj via idaro eterne.
Kaj li leviĝis kaj foriris, kaj Jonatan venis en la urbon.

21 Kaj David venis en Nobon al la pastro Aĥimeleĥ,
kaj Aĥimeleĥ time eliris renkonte al David, kaj
diris al li: Kial vi estas sola kaj neniu estas kun vi? 2
Kaj David respondis al la pastro Aĥimeleĥ: La reĝo
ion komisiis al mi, kaj diris al mi: Neniu ion sciu pri
la afero, por kiu mi sendas vin kaj kiun mi komisiis
al vi; tial por miaj junuloj mi destinis lokon tian kaj
tian. 3 Nun kion vi havas sub la mano? donu en mian
manon kvin panojn, aŭ tion, kio troviĝos. 4 Kaj la
pastro respondis al David kaj diris: Simplan panon mi
ne havas sub mia mano, estas nur pano sankta, se
la junuloj nur detenis sin de virinoj. 5 Tiam David
respondis al la pastro kaj diris al li: Virinoj estas
for de ni de hieraŭ kaj antaŭhieraŭ, de la momento,
kiam mi eliris, kaj la apartenaĵoj de la junuloj estas
sanktaj; se la vojo estas malsankta, ĝi ankoraŭ hodiaŭ
sanktiĝos per la apartenaĵoj. 6 Tiam la pastro donis al
li la sanktaĵon, ĉar ne estis tie pano krom la panoj de
propono, kiuj estis forprenitaj de antaŭ la Eternulo,
por meti varman panon post la formeto de tiuj. 7
Tie unu el la servantoj de Saul estis enŝlosita en
tiu tago antaŭ la Eternulo; lia nomo estis Doeg la
Edomido, la ĉefa el la paŝtistoj de Saul. 8 Kaj David
diris al Aĥimeleĥ: Ĉu vi ne havas sub via mano lancon
aŭ glavon? ĉar nek mian glavon, nek miajn aliajn
batalilojn mi prenis kun mi, ĉar la afero de la reĝo
estis urĝa. 9 Tiam la pastro diris: La glavo de Goljat, la
Filiŝto, kiun vi mortigis en la valo de Ela, jen ĝi estas,
envolvita en vesto, malantaŭ la efodo. Se vi volas
preni ĝin al vi, prenu, ĉar ne haviĝas alia krom ĉi tiu.
Kaj David diris: Ne ekzistas simila al ĝi, donu ĝin al mi.
10 Kaj David leviĝis kaj forkuris en tiu tago de Saul, kaj
venis al Aĥiŝ, reĝo de Gat. 11 Kaj la servantoj de Aĥiŝ
diris al li: Tio estas ja David, reĝo de la lando! pri li
oni ja kantis, dancante, kaj dirante: Saul frapis milojn,
Kaj David dekmilojn! 12 David metis tiujn vortojn
en sian koron, kaj tre ektimis Aĥiŝon, la reĝon de
Gat. 13 Tial li ŝanĝis sian aspekton antaŭ iliaj okuloj,
furiozis inter iliaj manoj, desegnis sur la pordoj de
la pordego, kaj fluigis salivon sur sian barbon. 14
Tiam Aĥiŝ diris al siaj servantoj: Vi vidas ja, ke ĉi tiu
homo estas freneza; kial do vi venigis lin al mi? 15 Ĉu
mankas al mi frenezuloj, ke vi alkondukis ĉi tiun, ke li
faru frenezaĵojn antaŭ mi? ĉu tia povas eniri en mian
domon?

22 Kaj David foriris de tie, kaj saviĝis en la kaverno
Adulam. Kiam tion aŭdis liaj fratoj kaj la tuta
domo de lia patro, ili venis al li tien. 2 Kaj kolektiĝis al
li ĉiuj viroj premataj, ŝulduloj, afliktitoj, kaj li fariĝis
ilia estro; ili estis kun li ĉirkaŭ kvarcent viroj. 3 Kaj de

tie David iris en Micpen de Moab, kaj li diris al la reĝo
de Moab: Permesu al mia patro kaj al mia patrino
resti ĉe vi, ĝis mi ekscios, kion faros al mi Dio. 4 Kaj li
alkondukis ilin al la reĝo de Moab, kaj ili restis ĉe li la
tutan tempon, kiun David estis en la fortikaĵo. 5 Sed
la profeto Gad diris al David: Ne restu en la fortikaĵo;
iru kaj venu en la landon de Jehuda. Kaj David iris kaj
venis en la arbaron Ĥeret. 6 Saul aŭdis, ke aperis David
kaj la viroj, kiuj estis kun li. Saul tiam sidis en Gibea
sub la tamarisko sur la altaĵo, kaj lia lanco estis en lia
mano, kaj ĉiuj liaj servantoj staris apud li. 7 Kaj Saul
diris al siaj servantoj, kiuj staris apud li: Aŭskultu,
idoj de Benjamen: ĉu al ĉiuj el vi la filo de Jiŝaj donos
kampojn kaj vinberĝardenojn? ĉu vin ĉiujn li faros
milestroj kaj centestroj? 8 ĉar vi ĉiuj faris konspiron
kontraŭ mi, kaj neniu sciigis al miaj oreloj, ke mia
filo faris interligon kun la filo de Jiŝaj, kaj neniu el vi
kompatas min kaj sciigis al miaj oreloj, ke mia filo
instigis mian sklavon kontraŭ mi, por fari insidon,
kiel nun. 9 Tiam respondis Doeg la Edomido, kiu staris
kun la servantoj de Saul, kaj li diris: Mi vidis, ke la filo
de Jiŝaj venis en Nobon al Aĥimeleĥ, filo de Aĥitub. 10
Kaj ĉi tiu demandis pri li la Eternulon, kaj donis al
li manĝaĵon, kaj ankaŭ la glavon de la Filiŝto Goljat
li donis al li. 11 Tiam la reĝo sendis voki la pastron
Aĥimeleĥ, filo de Aĥitub, kaj la tutan domon de lia
patro, la pastrojn, kiuj estis en Nob, kaj ili ĉiuj venis al
la reĝo. 12 Kaj Saul diris: Aŭskultu, filo de Aĥitub! Kaj
ĉi tiu respondis: Jen mi estas, mia sinjoro. 13 Kaj Saul
diris al li: Kial vi faris konspiron kontraŭ mi, vi kaj
la filo de Jiŝaj, kiam vi donis al li panon kaj glavon,
kaj demandis pri li Dion, por ke li leviĝu kontraŭ
mi inside, kiel nun? 14 Kaj Aĥimeleĥ respondis al
la reĝo kaj diris: Kiu do el ĉiuj viaj servantoj estas
tiel fidela, kiel David, kiu estas bofilo de la reĝo kaj
fervore vin obeas kaj estas estimata en via domo? 15
ĉu hodiaŭ mi komencis demandi pri li Dion? neniel
mi tion farus! la reĝo ne kulpigu pri tio sian sklavon,
nek la tutan domon de mia patro; ĉar via sklavo sciis
pri ĉio ĉi tio nenion malgrandan nek grandan. 16
Sed la reĝo diris: Vi devas morti, Aĥimeleĥ, vi kaj
la tuta domo de via patro. 17 Kaj la reĝo diris al la
kuristoj, kiuj staris apud li: Turnu vin kaj mortigu la
pastrojn de la Eternulo, ĉar ili estas en interkonsento
kun David; ili sciis, ke li estas forkurinto, kaj tamen
ili ne raportis al mi. Sed la servantoj de la reĝo ne
volis levi siajn manojn, por frapi la pastrojn de la
Eternulo. 18 Tiam la reĝo diris al Doeg: Turnu vin vi
kaj frapu la pastrojn. Kaj Doeg la Edomido sin turnis
kaj frapis la pastrojn, kaj mortigis en tiu tago okdek
kvin virojn, kiuj portis linajn efodojn. 19 Kaj Nobon,
la urbon de la pastroj, li frapis per la akraĵo de la
glavo, la virojn kaj virinojn, infanojn kaj suĉinfanojn,
bovojn kaj azenojn kaj ŝafojn, ĉion per la akraĵo de la
glavo. 20 Sed forsaviĝis unu filo de Aĥimeleĥ, filo de
Aĥitub; lia nomo estis Ebjatar; li forkuris al David.
21 Kaj Ebjatar rakontis al David, ke Saul mortigis la
pastrojn de la Eternulo. 22 Tiam David diris al Ebjatar:
Mi sciis en tiu tago, kiam tie estis Doeg la Edomido,
ke li certe raportos al Saul; mi estas kulpa pri ĉiuj
animoj de via patrodomo. 23 Restu ĉe mi, ne timu;
ĉar kiu serĉos mian animon, tiu serĉos ankaŭ vian
animon; sed vi estos gardata ĉe mi.

23 Oni raportis al David la sciigon: Jen la Filiŝtoj
militas kontraŭ Keila kaj prirabas la draŝejojn. 2
Tiam David demandis la Eternulon, dirante: Ĉu mi iru
kaj frapu tiujn Filiŝtojn? Kaj la Eternulo diris al David:
Iru kaj frapu la Filiŝtojn, kaj savu Keilan. 3 Sed la viroj
de David diris al li: Jen ĉi tie en Judujo ni timas; kiel
do estos, kiam ni iros al Keila, al la taĉmentoj de la
Filiŝtoj? 4 Tiam David denove demandis la Eternulon,
kaj la Eternulo respondis al li, dirante: Leviĝu, iru al
Keila, ĉar Mi transdonos la Filiŝtojn en viajn manojn. 5
Kaj David kun siaj viroj iris al Keila kaj batalis kontraŭ
la Filiŝtoj kaj forpelis iliajn brutojn kaj frapis ilin per
granda frapo; tiamaniere David savis la loĝantojn
de Keila. 6 Kiam Ebjatar, filo de Aĥimeleĥ, forkuris
al David en Keilan, li kunportis kun si efodon. 7
Oni raportis al Saul, ke David venis en Keilan. Tiam
Saul diris: Dio transdonis lin en mian manon, ĉar li
estas enŝlosita, enirinte en urbon, kiu havas pordojn
kaj riglilojn. 8 Kaj Saul kunvokigis la tutan popolon
por milito, por iri al Keila, por sieĝi Davidon kaj
liajn virojn. 9 Kiam David eksciis, ke Saul intencas
malbonon kontraŭ li, li diris al la pastro Ebjatar: Donu
la efodon. 10 Kaj David diris: Ho Eternulo, Dio de
Izrael, Via sklavo aŭdis, ke Saul intencas veni al Keila,
por pereigi la urbon pro mi. 11 Ĉu transdonos min
la loĝantoj de Keila en lian manon? ĉu venos ĉi tien
Saul, kiel aŭdis Via sklavo? Ho Eternulo, Dio de Izrael,
diru tion al Via sklavo! Kaj la Eternulo diris: Li venos.
12 Kaj David diris: Ĉu la loĝantoj de Keila transdonos
min kaj miajn homojn en la manon de Saul? Kaj la

Eternulo diris: Ili transdonos. 13 Tiam leviĝis David
kun siaj viroj, ĉirkaŭ sescent homoj, kaj eliris el Keila,
kaj iris, kien ili povis iri. Kaj al Saul oni raportis, ke
David foriĝis el Keila, kaj tial li decidis ne eliri. 14 Sed
David restis en la dezerto en nealirebla loko, kaj li
restis sur la monto en la dezerto Zif. Saul ĉiam serĉis
lin, sed Dio ne transdonis lin en lian manon. 15 David
vidis, ke Saul eliris, por serĉi lian animon; kaj David
estis en la dezerto Zif, inter arbetaĵoj. 16 Kaj leviĝis
Jonatan, filo de Saul, kaj iris al David en la arbetaĵojn,
kaj kuraĝigis lin per la nomo de Dio, 17 kaj diris al
li: Ne timu, ĉar ne atingos vin la mano de mia patro
Saul; kaj vi reĝos super Izrael, kaj mi estos la dua post
vi, kaj eĉ mia patro Saul tion bone scias. 18 Kaj ili
ambaŭ faris interligon antaŭ la Eternulo; kaj David
restis en la arbetaĵaro, kaj Jonatan iris al sia domo. 19
Dume Zifanoj venis al Saul en Gibean, kaj diris: David
sin kaŝas ĉe ni en nealirebla loko, inter arbetaĵoj, sur
la monteto Ĥaĥila, kiu estas sude de la dezerto; 20 kaj
nun laŭ la tuta deziro de via koro, ho reĝo, iru tien,
kaj ni transdonos lin en la manon de la reĝo. 21 Kaj
Saul diris: La Eternulo benu vin pro tio, ke vi kompatis
min. 22 Iru, mi petas, informiĝu ankoraŭ, kaj ekkonu
kaj rigardu lian lokon, kie paŝas lia piedo, kaj kiu lin
tie vidis; ĉar oni diris al mi, ke li estas tre ruza. 23 Kaj
rigardu kaj eksciu ĉiujn kaŝejojn, kie li sin kaŝas, kaj
revenu al mi kun certeco, kaj tiam mi iros kun vi. Se
li troviĝas en la lando, mi serĉos lin en ĉiuj milejoj
de Jehuda. 24 Ili leviĝis kaj iris en Zifon antaŭ Saul.
Sed David kaj liaj homoj estis en la dezerto Maon,
sur la ebenaĵo sude de la dezerto. 25 Kiam Saul kun
siaj homoj iris, por serĉi, oni sciigis Davidon, kaj li
malsupreniris al la roko kaj restis en la dezerto Maon.
Kaj kiam Saul aŭdis tion, li postkuris Davidon en la
dezerto Maon. 26 Saul iris sur unu flanko de la monto,
kaj David kun siaj homoj sur la dua flanko. David
rapidis foriri de Saul, kaj Saul kun siaj homoj penis
ĉirkaŭi Davidon kaj liajn homojn, por kapti ilin. 27
Sed venis sendito al Saul, kaj diris: Rapide iru, ĉar la
Filiŝtoj atakis la landon. 28 Tiam Saul ĉesis postkuri
Davidon, kaj iris kontraŭ la Filiŝtojn; tial oni donis al
tiu loko la nomon Roko de Disiĝo. 29 Kaj David leviĝis
de tie, kaj ekloĝis sur nealirebla loko de En-Gedi.

**24** Kiam Saul revenis de sia iro kontraŭ la Filiŝtoj,
oni raportis al li, dirante: Jen David estas en la
dezerto En-Gedi. 2 Tiam Saul prenis tri mil virojn,
elektitajn el la tuta Izrael, kaj iris serĉi Davidon kaj
liajn homojn sur la rokoj de la ibeksoj. 3 Kaj li venis
al la baraĵoj de la ŝafoj ĉe la vojo; tie estis kaverno;
kaj Saul eniris tien por natura bezono. Kaj David kun
siaj homoj estis en la profundo de la kaverno. 4 Tiam
la homoj de David diris al li: Jen estas la tago, pri
kiu la Eternulo diris al vi: Jen Mi transdonos vian
malamikon en viajn manojn, por ke vi faru al li tion,
kio plaĉos al vi. Sed David leviĝis, kaj nerimarkite
detranĉis anguleton de la vesto de Saul. 5 Tamen post
tio la koro de David ekbatis en li pro tio, ke li detranĉis
la vestanguleton de Saul. 6 Kaj li diris al siaj homoj: La
Eternulo gardu min, ke mi ne faru tian faron al mia
sinjoro, al la sanktoleito de la Eternulo, etendante
mian manon kontraŭ lin; li estas ja sanktoleito de
la Eternulo. 7 Kaj David repuŝis siajn homojn per la
vortoj, kaj ne permesis al ili leviĝi kontraŭ Saulon.
Kaj Saul leviĝis el la kaverno kaj iris sur la vojon. 8
Post tio leviĝis David kaj eliris el la kaverno, kaj kriis
post Saul jene: Mia sinjoro, ho reĝo! Saul ekrigardis
malantaŭen, kaj tiam David klinis sian vizaĝon al
la tero kaj adorkliniĝis. 9 Kaj David diris al Saul:
Kial vi aŭskultas la vortojn de homoj, kiuj diras: Jen
David serĉas malbonon kontraŭ vi? 10 Jen hodiaŭ viaj
okuloj vidis, ke la Eternulo transdonis vin hodiaŭ
en mian manon en la kaverno, kaj oni diris, ke mi
mortigu vin; sed mi indulgis vin, kaj mi diris: Mi ne
etendos mian manon kontraŭ mian sinjoron, ĉar li
estas sanktoleito de la Eternulo. 11 Mia patro, rigardu
kaj vidu la anguleton de via vesto en mia mano; el
tio, ke mi detranĉis la anguleton de via vesto, sed ne
mortigis vin, sciu kaj vidu, ke mi ne havas malbonon
nek krimon en mia mano kaj mi ne pekis kontraŭ vi;
sed vi postkuras mian animon, por preni ĝin. 12 La
Eternulo juĝu inter mi kaj vi, kaj la Eternulo venĝu al
vi pro mi; sed mia mano ne estos sur vi. 13 Kiel diras
antikva proverbo: De malpiuloj eliras malpiaĵo; sed
mia mano ne estos sur vi. 14 Post kiu eliris la reĝo
de Izrael? kiun vi postkuras? malvivan hundon, unu
pulon. 15 La Eternulo estu juĝanto kaj juĝu inter mi
kaj vi, kaj Li rigardu kaj prizorgu mian proceson kaj
defendu min kontraŭ via mano. 16 Kaj kiam David
finis la paroladon de tiuj vortoj al Saul, Saul diris: Ĉu
tio estas via voĉo, mia filo David? Kaj Saul levis sian
voĉon kaj ekploris. 17 Kaj li diris al David: Vi estas pli
justa ol mi; ĉar vi repagis al mi per bono, dum mi
repagis al vi per malbono. 18 Kaj hodiaŭ vi montris al

mi, kiel vi agis bone kun mi; ĉar la Eternulo transdonis
min en vian manon, kaj vi ne mortigis min. 19 Kiam
homo trovas sian malamikon, ĉu li forliberigas lin
en bona maniero? La Eternulo repagu al vi per bono
pro tio, kion vi hodiaŭ faris al mi. 20 Kaj jen nun mi
eksciis, ke vi fariĝos reĝo, kaj fortikiĝos en via mano
la regno de Izrael. 21 Ĵuru do al mi per la Eternulo,
ke vi ne ekstermos mian idaron post mi kaj vi ne
malaperigos mian nomon el la domo de mia patro. 22
Kaj David ĵuris al Saul. Tiam Saul foriris al sia domo,
kaj David kun siaj homoj iris en la rifuĝejon.

**25** Samuel mortis; kaj kolektiĝis ĉiuj Izraelidoj, kaj
priploris lin kaj enterigis lin en lia domo en
Rama. Kaj David leviĝis, kaj foriris en la dezerton
Paran. 2 Estis viro en Maon, kiu havis siajn aferojn en
Karmel; tiu homo estis tre potenca, li havis tri mil
ŝafojn kaj mil kaprojn. Tiam oni estis tondanta liajn
ŝafojn en Karmel. 3 La nomo de tiu viro estis Nabal,
kaj la nomo de lia edzino estis Abigail. La virino estis
prudenta kaj belaspekta; sed la viro estis malmola
kaj malbona en siaj agoj, kaj li estis Kalebido. 4 Kiam
David aŭdis en la dezerto, ke Nabal tondas siajn ŝafojn,
5 tiam David sendis dek junulojn, kaj David diris al la
junuloj: Iru Karmelon, kaj venu al Nabal kaj salutu lin
en mia nomo, 6 kaj diru: Feliĉon al vi! paco estu al vi,
paco al via domo, kaj paco al ĉio, kio apartenas al
vi. 7 Mi aŭdis, ke oni tondas al vi la ŝafojn. Nu, viaj
paŝtistoj estis kun ni, kaj ni ne ofendis ilin, kaj nenio
perdiĝis ĉe ili dum la tuta tempo, kiun ili estis en
Karmel. 8 Demandu viajn junulojn, kaj ili diros al vi;
tial miaj junuloj akiru vian favoron, tiom pli, ke ni
venis al festa tago; donu afable, kion trovos via mano,
al viaj sklavoj kaj al via filo David. 9 Kaj la servantoj
de David iris, kaj diris al Nabal ĉiujn tiujn vortojn en
la nomo de David, kaj haltis. 10 Sed Nabal respondis al
la servantoj de David, dirante: Kiu estas David? kaj kiu
estas la filo de Jiŝaj? nun estas multe da tiaj servantoj,
kiuj foriĝis de siaj sinjoroj. 11 Ĉu mi prenu mian panon
kaj mian akvon, kaj mian viandon, kiun mi buĉigis
por miaj tondantoj, kaj mi donu tion al homoj, pri
kiuj mi ne scias, de kie ili estas? 12 Kaj la servantoj
de David ekiris returne sian vojon, kaj revenis kaj
raportis al li ĉiujn tiujn vortojn. 13 Tiam David diris al
siaj homoj: Zonu ĉiu sian glavon! Kaj ili zonis ĉiu sian
glavon, kaj ankaŭ David zonis sian glavon; kaj iris kun
David ĉirkaŭ kvarcent viroj, kaj ducent restis ĉe la
armilaro. 14 Sed al Abigail, edzino de Nabal, unu el la
servantoj raportis, dirante: Jen David sendis senditojn
el la dezerto, por deziri feliĉon al nia sinjoro, sed
li forofendis ilin; 15 kaj tiuj homoj estis tre bonaj
por ni, kaj ili ne ofendis nin, kaj nenio perdiĝis ĉe ni
dum la tuta tempo, kiun ni iradis kun ili, estante sur
la kampo; 16 muro ili estis por ni kiel en la nokto,
tiel en la tago, la tutan tempon, kiun ni estis kun ili,
paŝtante la ŝafojn; 17 tial nun pripensu kaj rigardu,
kion vi devas fari, ĉar decidita estas malbono kontraŭ
nia sinjoro kaj kontraŭ lia tuta domo; kaj li estas ja
malhumila homo, oni ne povas paroli kun li. 18 Tiam
Abigail rapide prenis ducent panojn kaj du felsakojn
da vino kaj kvin pretigitajn ŝafojn kaj kvin mezurojn
da rostitaj grajnoj kaj cent kukojn sekvinberajn kaj
ducent kukojn figajn, kaj metis ĉion sur azenojn. 19
Kaj ŝi diris al siaj servantoj: Iru antaŭ mi, jen mi venas
post vi. Sed al sia edzo Nabal ŝi nenion diris. 20 Dum
ŝi estis rajdanta sur la azeno kaj malleviĝanta al la
bazo de la monto, jen David kun siaj homoj malleviĝas
renkonte al ŝi, kaj ŝi renkontiĝis kun ili. 21 Dume
David estis dirinta: Nur vane mi gardis la apartenaĵon
de tiu homo en la dezerto, ke nenio perdiĝis el lia
havo; li repagis al mi malbonon pro bono; 22 tiel
Dio faru al la malamikoj de David kaj pli: el ĉio, kio
apartenas al li, mi restigos ĝis la morgaŭa mateniĝo
neniun virseksulon. 23 Kiam Abigail ekvidis Davidon,
ŝi rapide deiris de la azeno, kaj ĵetis sin antaŭ David
vizaĝaltere kaj adorkliniĝis ĝis la tero. 24 Kaj ŝi ĵetis
sin antaŭ liajn piedojn, kaj diris: Sur mi, mia sinjoro,
estas la krimo; permesu, ke via sklavino parolu al viaj
oreloj, kaj aŭskultu la vortojn de via sklavino. 25 Mia
sinjoro ne atentu tiun malvirtan viron Nabal, ĉar kia
estas lia nomo, tia li mem estas: Nabal estas lia nomo,
kaj malsaĝecon li havas en si; kaj mi, via sklavino, ne
vidis la servantojn de mia sinjoro, kiujn vi sendis. 26
Kaj nun, mia sinjoro, kiel vivas la Eternulo kaj kiel
vivas via animo, la Eternulo retenas vin, ke vi ne
falu en sangon kaj ke vi ne helpu vin per via propra
mano; nun estu kiel Nabal viaj malamikoj, kaj tiuj,
kiuj deziras malbonon al mia sinjoro. 27 Kaj jen ĉi tiu
benaĵo, kiun via sklavino alportis al mia sinjoro; ĝi
estu donita al la servantoj, kiuj sekvas mian sinjoron.
28 Pardonu, mi petas, la krimon de via sklavino, ĉar la
Eternulo aranĝos al mia sinjoro domon fidindan, pro
tio, ke mia sinjoro militas la militojn de la Eternulo;
kaj malbono neniam estu trovata ĉe vi. 29 Se leviĝis

homo, por vin persekuti kaj serĉi vian animon, la
animo de mia sinjoro tamen estas ĉirkaŭbarita per
ĉirkaŭbaro de vivo ĉe la Eternulo, via Dio; sed la animo
de viaj malamikoj estos forĵetita kvazaŭ per ĵetilo.
30 Kiam la Eternulo faros al mia sinjoro ĉion bonan,
kiun Li promesis, kaj faros vin estro super Izrael, 31
tiam ĉi tio ne estu por vi puŝiĝilo nek korfalilo por
mia sinjoro, se vi verŝos sangon senkaŭze kaj se mia
sinjoro helpos sin mem. Tiam la Eternulo faros bonon
al mia sinjoro, kaj vi rememoros vian sklavinon. 32
Tiam David diris al Abigail: Benata estu la Eternulo,
Dio de Izrael, kiu sendis vin hodiaŭ al mi renkonte.
33 Kaj benata estu via elokventeco, kaj benata estu
vi, kiu malhelpis min hodiaŭ de enfalo en sangon
kaj de helpado al mi per mia propra mano. 34 Sed
kiel vivas la Eternulo, Dio de Izrael, kiu malhelpis
min fari al vi malbonon: se vi ne rapidus kaj ne
venus al mi renkonte, ĝis la mateniĝo restus ĉe Nabal
neniu virseksulo. 35 Kaj David prenis el ŝia mano tion,
kion ŝi alportis al li, kaj li diris al ŝi: Iru pace al via
domo; vidu, mi aŭskultis vian voĉon kaj honoris vian
vizaĝon. 36 Kiam Abigail venis al Nabal, jen li havis
festenon en sia domo, kiel festeno de reĝo, kaj la koro
de Nabal estis gaja en li, kaj li estis tre ebria; sed
ŝi diris al li nenion malgrandan nek grandan ĝis la
mateniĝo. 37 Matene, kiam la vino eliris el Nabal, lia
edzino rakontis al li tion, kio okazis; tiam rigidiĝis
en li lia koro, kaj li fariĝis kiel ŝtono. 38 Post dek
tagoj la Eternulo frapis Nabalon, kaj li mortis. 39
Kiam David aŭdis, ke Nabal mortis, li diris: Benata
estu la Eternulo, kiu juĝe punis pro la malhonoro,
kiun mi havis de Nabal, kaj Sian sklavon Li detenis
de malbono, kaj la malbonecon de Nabal la Eternulo
returnis sur lian kapon. Kaj David sendis kaj paroligis
al Abigail, ke li volas preni ŝin al si kiel edzinon. 40 Kaj
venis la servantoj de David al Abigail en Karmelon,
kaj diris al ŝi jene: David sendis nin al vi, por preni
vin al li kiel edzinon. 41 Tiam ŝi leviĝis, kaj kliniĝis
kun la vizaĝo ĝis la tero, kaj diris: Jen via sklavino
estas servantino, por lavi la piedojn de la servantoj de
mia sinjoro. 42 Kaj Abigail rapide leviĝis kaj ekrajdis
sur azeno, kaj ŝiaj kvin servantinoj ekiris post ŝi, kaj
ŝi sekvis la senditojn de David kaj fariĝis lia edzino.
43 Ankaŭ Aĥinoamon el Jizreel David prenis, kaj ili
ambaŭ fariĝis liaj edzinoj. 44 Sed Saul fordonis sian
filinon Miĥal, edzinon de David, al Palti, filo de Laiŝ,
el Galim.

26 Venis la Zifanoj al Saul en Gibean, kaj diris: David
ja kaŝas sin sur la monteto Ĥaĥila, kiu estas
antaŭ la dezerto. 2 Tiam Saul leviĝis kaj ekiris al
la dezerto Zif, kaj kun li estis tri mil viroj elektitaj
el Izrael, por serĉi Davidon en la dezerto Zif. 3 Kaj
Saul starigis sian tendaron sur la monteto Ĥaĥila, kiu
estas antaŭ la dezerto, apud la vojo. Kaj David estis
en la dezerto, kaj vidis, ke Saul venis en la dezerton,
por lin serĉi. 4 Kaj David sendis esplorrigardantojn,
kaj konvinkiĝis, ke Saul efektive venis. 5 Tiam David
leviĝis, kaj venis al la loko, kie staris tendare Saul,
kaj David rigardis la lokon, kie kuŝis Saul, kaj Abner,
filo de Ner, lia militestro. Saul kuŝis en la centro de
la tendaro, kaj la tuta popolo ĉirkaŭ li. 6 Kaj David
ekparolis kaj diris al Aĥimeleĥ la Ĥetido, kaj al Abiŝaj,
filo de Ceruja, frato de Joab, jene: Kiu iros kun mi al
Saul en la tendaron? Kaj Abiŝaj diris: Mi iros kun vi. 7
Kaj David kaj Abiŝaj venis al la popolo nokte; kaj jen
Saul kuŝas kaj dormas en la centro de la tendaro, kaj
lia lanco estas enfiksita en la tero apud lia kaploko,
kaj Abner kaj la popolo kuŝas ĉirkaŭe. 8 Tiam Abiŝaj
diris al David: Dio transdonis hodiaŭ vian malamikon
en viajn manojn; nun permesu, ke mi trapiku lin per
la lanco al la tero unu fojon; duan fojon mi tion ne
faros al li. 9 Sed David diris al Abiŝaj: Ne pereigu lin;
ĉar kiu povas senpune etendi sian manon kontraŭ la
sanktoleiton de la Eternulo? 10 Kaj David diris: Mi
ĵuras per la Eternulo, ke nur la Eternulo lin frapos; aŭ
venos lia tago kaj li mortos, aŭ li iros en militon kaj
pereos. 11 La Eternulo gardu min, ke mi ne etendu
mian manon kontraŭ sanktoleiton de la Eternulo!
nun prenu la lancon, kiu estas apud lia kaploko, kaj la
vazon kun la akvo, kaj ni foriru. 12 Kaj David prenis
la lancon kaj la vazon kun la akvo de la kaploko de
Saul, kaj ili foriris; kaj neniu vidis, neniu rimarkis, kaj
neniu vekiĝis, sed ĉiuj dormis; ĉar dormego venanta
de la Eternulo falis sur ilin. 13 Kaj David transiris sur
la alian flankon, kaj stariĝis sur la supro de la monto,
malproksime, tiel ke granda interspaco estis inter
ili. 14 Kaj David ekkriis al la popolo, kaj al Abner, filo
de Ner, jene: Ĉu vi ne respondos, Abner? Kaj Abner
respondis kaj diris: Kiu vi estas, kiu krias kontraŭ la
reĝo? 15 Tiam David diris al Abner: Ĉu vi ne estas viro?
kaj kiu estas egala al vi en Izrael? kial do vi ne gardis
vian sinjoron, la reĝon? ĉar venis unu el la popolo,
por pereigi la reĝon, vian sinjoron. 16 Ne bona estas
tio, kion vi faris. Kiel vivas la Eternulo, vi meritas

la morton pro tio, ke vi ne gardis vian sinjoron, la
sanktoleiton de la Eternulo. Nun rigardu, kie estas
la lanco de la reĝo, kaj la vazo kun la akvo, kiu estis
apud lia kaploko. 17 Tiam Saul rekonis la voĉon de
David, kaj diris: Ĉu tio estas via voĉo, mia filo David?
Kaj David diris: Ĝi estas mia voĉo, mia sinjoro, ho
reĝo. 18 Kaj li diris plue: Kial mia sinjoro persekutas
sian sklavon? kion mi faris? kaj kia malbono estas en
mia mano? 19 Nun mia sinjoro la reĝo volu aŭskulti
la vortojn de sia sklavo: se la Eternulo incitas vin
kontraŭ mi, ekodoru farunofero; sed se homoj, tiam
ili estu malbenitaj antaŭ la Eternulo; ĉar ili elpelis
min nun, ke mi ne partoprenu en la heredaĵo de la
Eternulo, kaj ili diras: Iru, servu al aliaj dioj. 20 Nun
mia sango ne falu sur la teron malproksime de la
vizaĝo de la Eternulo; la reĝo de Izrael eliris ja, por
serĉi iun pulon, kiel oni postkuras perdrikon en la
montoj. 21 Tiam Saul diris: Mi pekis; revenu, mia filo
David, ĉar mi ne plu faros al vi malbonon, pro tio, ke
mia animo estis kara antaŭ viaj okuloj hodiaŭ. Jen
mi agis malsaĝe kaj tre multe eraris. 22 Kaj David
respondis kaj diris: Jen estas la lanco de la reĝo; unu
el la servantoj venu kaj prenu ĝin; 23 kaj la Eternulo
repagu al ĉiu laŭ lia justeco kaj fideleco. La Eternulo
transdonis vin hodiaŭ en miajn manojn, sed mi ne
volis etendi mian manon kontraŭ sanktoleiton de la
Eternulo. 24 Jen, kiel via animo havis hodiaŭ grandan
valoron en miaj okuloj, tiel mia animo havu grandan
valoron en la okuloj de la Eternulo, kaj Li savu min de
ĉia mizero. 25 Kaj Saul diris al David: Benata vi estu,
mia filo David; vi faros vian faron, kaj vi venkos. Kaj
David iris sian vojon, kaj Saul reiris al sia loko.

**27** Tamen David diris al si mem: Mi povas enfali iun
tagon en la manon de Saul; estas por mi nenio pli
bona, ol ke mi forkuru en la landon de la Filiŝtoj, por
ke Saul ĉesu serĉi min plu en la regionoj de Izrael, kaj
por ke mi saviĝu kontraŭ lia mano. 2 Kaj David leviĝis
kaj transiris, li kaj la sescent viroj, kiuj estis kun li, al
Aĥiŝ, filo de Maoĥ, reĝo de Gat. 3 Kaj David ekloĝis
ĉe Aĥiŝ en Gat, li kaj liaj viroj, ĉiu kun sia domo,
David kun siaj du edzinoj, Aĥinoam, la Jizreelanino,
kaj Abigail, edzino de Nabal, la Karmelanino. 4 Kiam
oni raportis al Saul, ke David forkuris en Gaton, li ne
plu serĉis lin. 5 Kaj David diris al Aĥiŝ: Se mi akiris
vian favoron, oni donu al mi, mi petas, lokon en unu
el la urboj de la kamparo, por ke mi ekloĝu tie; por
kio via sklavo loĝu en via reĝa urbo kune kun vi? 6
Kaj Aĥiŝ donis al li en tiu tago Ciklagon; pro tio Ciklag
fariĝis apartenaĵo de la reĝoj de Judujo ĝis nun. 7 La
nombro de la tagoj, kiujn David traloĝis en la regiono
de la Filiŝtoj, estis unu jaro kaj kvar monatoj. 8 Kaj
David kun siaj viroj iris kaj atakis la Geŝuridojn kaj
Gezeridojn kaj Amalekidojn, ĉar ili loĝis en tiu lando
de antikva tempo ĝis Ŝur kaj ĝis la lando Egipta. 9
Kiam David venkobatis la landon, li lasis la vivon nek
al viroj nek al virinoj, sed prenis ŝafojn kaj bovojn kaj
azenojn kaj kamelojn kaj vestojn, kaj reiris kaj venis
al Aĥiŝ. 10 Kiam Aĥiŝ demandis: Ĉu vi ne faris hodiaŭ
atakon? David respondis: Sur la sudan regionon de
Jehuda, sur la sudan regionon de la Jeraĥmeelidoj, kaj
sur la sudan regionon de la Kenidoj. 11 Nek viron nek
virinon David lasis veni viva en Gaton, dirante: Ili ne
parolu kontraŭ ni, dirante, ke tiel agis David. Kaj tia
estis lia maniero de agado dum la tuta tempo, kiun
li loĝis en la regiono de la Filiŝtoj. 12 Kaj Aĥiŝ fidis
Davidon, dirante: Li faris sin abomeninda antaŭ sia
popolo Izrael, kaj tial li estos mia sklavo por ĉiam.

**28** Okazis en tiu tempo, ke la Filiŝtoj kolektis sian
militistaron, por militi kontraŭ Izrael. Kaj Aĥiŝ
diris al David: Sciu, ke vi iros kun mi en la militon, vi
kaj viaj viroj. 2 Kaj David diris al Aĥiŝ: Tial vi ekscios,
kion faros via sklavo. Kaj Aĥiŝ diris al David: Mi
faros vin por ĉiam mia kapogardisto. 3 Dume Samuel
mortis, kaj ĉiuj Izraelidoj lin priploris, kaj enterigis
lin en Rama, en lia urbo. Kaj Saul estis eksterminta
el la lando ĉiujn sorĉistojn kaj aŭguristojn. 4 Kiam
la Filiŝtoj kolektiĝis, kaj venis kaj stariĝis tendare
en Ŝunem, tiam Saul kolektis ĉiujn Izraelidojn, kaj
ili stariĝis tendare en Gilboa. 5 Kiam Saul ekvidis la
tendaron de la Filiŝtoj, li ektimis, kaj lia koro forte
ektremis. 6 Kaj Saul petis konsilon ĉe la Eternulo, sed
la Eternulo ne respondis al li per sonĝoj, nek per la
signoj de lumo, nek per profetoj. 7 Tiam Saul diris al
siaj servantoj: Elserĉu al mi virinon, kiu povoscias
aŭguri, por ke mi iru al ŝi kaj ricevu de ŝi informojn.
Kaj liaj servantoj diris: Jen ekzistas en En-Dor virino,
kiu povoscias aŭguri. 8 Tiam Saul ŝanĝis siajn vestojn,
metis sur sin aliajn vestojn, kaj iris kune kun du viroj,
kaj ili venis al la virino nokte. Kaj li diris: Aŭguru al
mi, mi petas, per via aŭgura povoscio, kaj elvoku al mi
tiun, pri kiu mi diros al vi. 9 Sed la virino diris al li: Vi
scias ja, kion faris Saul, kiu ekstermis la sorĉistojn kaj

la aŭguristojn el la lando; kial do vi volas retkapti
mian animon, por pereigi min? 10 Tiam Saul ĵuris
al ŝi per la Eternulo, dirante: Kiel vivas la Eternulo,
ne trafos vin puno pro ĉi tiu afero. 11 Kaj la virino
diris: Kiun mi elvoku al vi? Kaj li diris: Samuelon
elvoku al mi. 12 Kiam la virino ekvidis Samuelon, ŝi
ekkriis per laŭta voĉo; kaj la virino diris al Saul: Kial
vi min trompis? vi estas ja Saul. 13 Sed la reĝo diris al
ŝi: Ne timu; kion vi vidis? Kaj la virino diris al Saul:
Iun dian mi vidis leviĝantan el la tero. 14 Kaj li diris
al ŝi: Kia estas lia aspekto? Kaj ŝi diris: Leviĝas viro
maljuna, kaj li estas vestita per pastra tuniko. Tiam
Saul komprenis, ke tio estas Samuel; kaj li klinis sin
kun la vizaĝo ĝis la tero, kaj faris adorsaluton. 15
Tiam Samuel diris al Saul: Kial vi maltrankviligis min,
elvokante min supren? Kaj Saul respondis: Mi estas
en tre premita stato; la Filiŝtoj militas kontraŭ mi, kaj
Dio forturnis Sin de mi kaj jam ne respondas al mi per
profetoj nek per sonĝoj; tial mi vokis vin, por ke vi
sciigu al mi, kion mi devas fari. 16 Sed Samuel diris:
Kial do vi demandas min, se la Eternulo forturnis
Sin de vi kaj transiris al via konkuranto? 17 Kaj la
Eternulo faros al li, kion Li diris per mi; kaj la Eternulo
elŝiros la regnon el viaj manoj kaj donos ĝin al via
proksimulo David. 18 Ĉar vi ne aŭskultis la voĉon de la
Eternulo kaj ne plenumis Lian flaman koleron kontraŭ
Amalek, tial ĉi tion faris hodiaŭ la Eternulo al vi; 19
kaj la Eternulo transdonos kune kun vi ankaŭ Izraelon
en la manojn de la Filiŝtoj; kaj morgaŭ vi kaj viaj filoj
estos kun mi; ankaŭ la tendaron de Izrael la Eternulo
transdonos en la manojn de la Filiŝtoj. 20 Tiam Saul
tuj falis laŭ sia tuta longeco sur la teron, ĉar li tre
ektimis pro la vortoj de Samuel; ankaŭ forton li ne
havis en si, ĉar li nenion manĝis la tutan tagon kaj
la tutan nokton. 21 Kiam la virino aliris al Saul, kaj
vidis, ke li estas tre konsternita, ŝi diris al li: Jen via
sklavino obeis vian voĉon, kaj mi metis en danĝeron
mian animon, kaj obeis la vortojn, kiujn vi diris al
mi; 22 nun mi petas, aŭskultu ankaŭ vi la voĉon de
via sklavino, kaj mi metos antaŭ vin pecon da pano,
kaj vi manĝu, por ke vi havu forton, kiam vi iros la
vojon. 23 Sed li rifuzis, kaj diris: Mi ne manĝos. Sed
kiam insistis super li liaj servantoj kaj ankaŭ la virino,
li obeis ilian voĉon, leviĝis de la tero, kaj sidiĝis sur
lito. 24 La virino havis en la domo grasigitan bovidon;
ŝi rapide ĝin buĉis, kaj ŝi prenis farunon, knedis ĝin,
kaj bakis el ĝi macojn. 25 Kaj ŝi alportis tion antaŭ
Saulon kaj antaŭ liajn servantojn, kaj ili manĝis; kaj
en la sama nokto ili leviĝis kaj foriris.

**29** Dume la Filiŝtoj kolektis sian tutan militistaron
en Afek; kaj la Izraelidoj staris tendare apud la
fonto, kiu estas en Jizreel. 2 La estroj de la Filiŝtoj
preterpasis kun siaj centoj kaj miloj, kaj David kun
siaj viroj preterpasis en la fina parto kun Aĥiŝ. 3
Kaj la estroj de la Filiŝtoj diris: Por kio estas ĉi tiuj
Hebreoj? Sed Aĥiŝ respondis al la estroj de la Filiŝtoj:
Tio estas ja David, servanto de Saul, reĝo de Izrael; li
estis kun mi kelkan tempon aŭ eĉ jarojn, kaj mi trovis
en li nenion de post la tago de la defalo ĝis nun. 4
Sed ekkoleris kontraŭ li la estroj de la Filiŝtoj, kaj
la estroj de la Filiŝtoj diris al li: Reirigu tiun viron,
kaj li revenu sur sian lokon, kiun vi destinis por li,
sed li ne iru kun ni en la batalon kaj ne fariĝu nia
kontraŭulo dum la batalo; ĉar per kio ĉi tiu povus
favorigi al si sian sinjoron, se ne per la kapoj de niaj
viroj? 5 Ĉu tio ne estas ja tiu David, pri kiu oni kantis
en la dancrondoj jene: Saul frapis milojn, Kaj David
dekmilojn? 6 Tiam Aĥiŝ alvokis Davidon, kaj diris al
li: Kiel vivas la Eternulo, vi estas honesta, kaj plaĉas
al mi via agado kun mi en la tendaro; mi ne trovis
en vi malbonon de post la tago de via veno al mi ĝis
hodiaŭ; sed al la estroj vi ne plaĉas. 7 Reiru do nun
kaj iru en paco, por ke vi ne faru ion ne plaĉan al la
estroj de la Filiŝtoj. 8 Sed David diris al Aĥiŝ: Kion mi
faris, kaj kion vi trovis en via sklavo de post la tago,
kiam mi stariĝis antaŭ vi, ĝis nun, ke mi ne iru kaj ne
batalu kontraŭ la malamikoj de mia sinjoro la reĝo?
9 Kaj Aĥiŝ respondis kaj diris al David: Mi scias, ke
vi estas bona antaŭ miaj okuloj, kiel anĝelo de Dio;
sed la estroj de la Filiŝtoj diras: Li ne iru kun ni en la
batalon. 10 Leviĝu do frue matene kun la servantoj de
via sinjoro, kiuj venis kun vi; leviĝu frue matene kaj,
kiam vi havos lumon, foriru. 11 Kaj David, li mem kaj
liaj viroj, leviĝis frue, por iri matene, por reveni en
la landon de la Filiŝtoj; kaj la Filiŝtoj direktis sin al
Jizreel.

**30** Kiam David kaj liaj viroj venis en Ciklagon en la
tria tago, la Amalekidoj estis atakintaj la sudan
regionon kaj Ciklagon, venkobatintaj Ciklagon kaj
forbruligintaj ĝin per fajro. 2 Ili prenis en malliberecon
la virinojn, kiuj estis tie, de la malgrandaj ĝis la
grandaj; ili neniun mortigis, sed forkondukis, kaj iris
sian vojon. 3 Kiam David kun siaj viroj venis al la

urbo, ili ekvidis, ke ĝi estas forbruligita per fajro,
kaj iliaj edzinoj kaj filoj kaj filinoj estas prenitaj en
malliberecon. 4 Tiam David, kaj la homoj, kiuj estis
kun li, levis sian voĉon kaj ekploris, ĝis ili jam ne havis
forton por plori. 5 La du edzinoj de David ankaŭ estis
prenitaj en malliberecon, Aĥinoam, la Jizreelanino,
kaj Abigail, edzino de Nabal, la Karmelanino. 6 Kaj
al David estis tre malfacile, ĉar la popolo intencis
ŝtonmortigi lin, ĉar tre koleris la tuta popolo, ĉiu pro
siaj filoj kaj siaj filinoj. Sed David havis fortan fidon
al la Eternulo, sia Dio. 7 Kaj David diris al Ebjatar,
la pastro, filo de Aĥimeleĥ: Volu alporti al mi la
efodon; kaj Ebjatar alportis la efodon al David. 8 Tiam
David faris demandon al la Eternulo, dirante: Ĉu mi
postkuru tiun amason, kaj ĉu mi ĝin kaptos? Kaj Li
diris al li: Postkuru, ĉar vi kaptos kaj vi savos. 9 Kaj
David iris, li kaj la sescent viroj, kiuj estis kun li, kaj ili
venis al la torento Besor, kaj la postrestintoj haltis. 10
Kaj postkuris David kun kvarcent viroj; haltis ducent
viroj, kiuj estis tro lacaj, por transiri la torenton
Besor. 11 Kaj ili trovis iun Egipton sur la kampo, kaj ili
alkondukis lin al David; oni donis al li panon, kaj li
manĝis, kaj oni trinkigis al li akvon. 12 Kaj oni donis
al li pecon da figa kuko kaj du kuketojn sekvinberajn,
kaj li manĝis, kaj revenis al li lia spirito, ĉar antaŭ tio
li dum tri tagoj kaj tri noktoj ne manĝis panon kaj ne
trinkis akvon. 13 Kaj David diris al li: Kies vi estas?
kaj de kie vi estas? Kaj li respondis: Mi estas Egipta
junulo, mi estas sklavo de unu Amalekido; sed mia
sinjoro forlasis min, ĉar mi malsaniĝis antaŭ tri tagoj.
14 Ni atakis la sudan regionon de la Keretidoj kaj la
regionon de Jehuda kaj la sudan regionon de Kaleb,
kaj Ciklagon ni forbruligis per fajro. 15 Tiam David
diris al li: Ĉu vi kondukos min al tiu amaso? Kaj li
respondis: Ĵuru al mi per Dio, ke vi ne mortigos min
kaj ne transdonos min en la manon de mia sinjoro;
tiam mi kondukos vin al tiu amaso. 16 Kaj li alkondukis
lin; kaj jen ili, disĵetitaj sur la tuta landpeco, manĝas
kaj trinkas kaj festenas pro la tuta granda militakiro,
kiun ili prenis el la lando Filiŝta kaj el la lando Juda.
17 Kaj David batis ilin de la mateno ĝis la morgaŭa
vespero; kaj neniu el ili sin savis, krom kvarcent junaj
viroj, kiuj ekrajdis sur la kameloj kaj forkuris. 18
Kaj David savis ĉion, kion prenis la Amalekidoj, kaj
siajn du edzinojn David savis. 19 Kaj mankis al ili
nenio malgranda nek granda, nek el la filoj nek el la
filinoj, nek el la militakiro, nek el ĉio, kion ili prenis
al si: ĉion David reprenis. 20 Kaj David prenis ĉiujn
ŝafojn kaj bovojn kaj pelis la brutojn antaŭ si, kaj oni
diris: Tio estas la militakiro de David. 21 Kaj David
venis al la ducent viroj, kiuj pro laceco ne povis sekvi
Davidon kaj estis restigitaj ĉe la torento Besor. Kaj
ili eliris renkonte al David, kaj al la popolo, kiu estis
kun li. Kaj David aliris al tiuj homoj kaj afable salutis
ilin. 22 Tiam kelkaj malbonaj kaj sentaŭgaj el la viroj,
kiuj iris kun David, ekparolis kaj diris: Pro tio, ke ili
ne iris kun ni, ni ne donu al ili ion el la militakiro,
kiun ni reprenis; nur al ĉiu lian edzinon kaj liajn
gefilojn; ili prenu kaj iru. 23 Sed David diris: Ne agu
tiel, miaj fratoj, kun tio, kion donis al ni la Eternulo,
kiu konservis nin, kaj transdonis en niajn manojn la
amason, kiu atakis nin. 24 Kaj kiu aŭskultos vin en tiu
afero? ĉar la parto de tiu, kiu iris en la batalon, devas
esti tia sama, kiel de tiu, kiu restis ĉe la ĉararo; egale
devas esti dividite. 25 Tiel estis de post tiu tago; kaj li
starigis tion kiel leĝon kaj moron en Izrael ĝis nun.
26 Kiam David venis en Ciklagon, li sendis iom el la
militakiro al la Judaj plejaĝuloj, al siaj amikoj, dirante:
Jen akceptu donacon el la militakiro de la malamikoj
de la Eternulo; 27 al tiuj, kiuj estis en Bet-El, kaj al tiuj,
kiuj estis en la suda Ramot, kaj al tiuj, kiuj estis en
Jatir, 28 kaj al tiuj, kiuj estis en Aroer, kaj al tiuj, kiuj
estis en Sifmot, kaj al tiuj, kiuj estis en Eŝtemoa, 29 kaj
al tiuj, kiuj estis en Raĥal, kaj al tiuj, kiuj estis en la
urboj de la Jeraĥmeelidoj, kaj al tiuj, kiuj estis en la
urboj de la Kenidoj, 30 kaj al tiuj, kiuj estis en Ĥorma,
kaj al tiuj, kiuj estis en Kor-Aŝan, kaj al tiuj, kiuj estis
en Ataĥ, 31 kaj al tiuj, kiuj estis en Ĥebron, kaj en ĉiuj
lokoj, en kiuj estis vaginta David kun siaj viroj.

**31** Dume la Filiŝtoj batalis kontraŭ Izrael; kaj la
Izraelidoj forkuris de la Filiŝtoj kaj falis mortigitaj
sur la monto Gilboa. 2 Kaj la Filiŝtoj kuratingis Saulon
kaj liajn filojn, kaj la Filiŝtoj mortigis Jonatanon kaj
Abinadabon kaj Malki-Ŝuan, filojn de Saul. 3 La batalo
fortiĝis kontraŭ Saul; kaj la arkpafistoj trovis lin, kaj li
estis forte vundita de la arkpafistoj. 4 Tiam Saul diris
al sia armilportisto: Eltiru vian glavon kaj trapiku min
per ĝi, por ke ne venu tiuj necirkumciditoj, por trapiki
min kaj mokmalhonori min. Sed lia armilportisto ne
volis, ĉar li forte timis. Tiam Saul prenis sian glavon
kaj faligis sin sur ĝin. 5 Kiam lia armilportisto vidis,
ke Saul mortis, li ankaŭ faligis sin sur sian glavon
kaj mortis kune kun li. 6 Tiamaniere mortis Saul kaj

liaj tri filoj kaj lia armilportisto kaj ĉiuj liaj viroj en
tiu tago kune kun li. 7 Kiam la Izraelidoj, kiuj estis
transe de la valo kaj transe de Jordan, vidis, ke la
Izraelidoj forkuras kaj ke Saul kaj liaj filoj mortis, ili
forlasis la urbojn kaj forkuris; kaj venis la Filiŝtoj kaj
ekloĝis en ili. 8 En la sekvanta tago venis la Filiŝtoj,
por senvestigi la mortigitojn; kaj ili trovis Saulon kaj
liajn tri filojn falintajn sur la monto Gilboa. 9 Tiam
ili dehakis lian kapon kaj deprenis liajn armilojn kaj
sendis en la landon de la Filiŝtoj ĉirkaŭen, por anonci
en la domo de iliaj idoloj kaj al la popolo. 10 Kaj ili
metis liajn armilojn en la templon de Aŝtar, kaj lian
korpon ili pendigis sur la muro de Bet-Ŝan. 11 Kiam la
loĝantoj de Jabeŝ en Gilead aŭdis pri tio, kion faris
la Filiŝtoj al Saul, 12 tiam ĉiuj kuraĝuloj leviĝis kaj
iris tutan nokton kaj prenis la korpon de Saul kaj la
korpojn de liaj filoj de la muro de Bet-Ŝan, kaj venis
en Jabeŝon kaj forbruligis ilin tie. 13 Kaj ili prenis
iliajn ostojn kaj enterigis sub la tamarisko en Jabeŝ,
kaj ili fastis dum sep tagoj.

# 2 Samuel

1 Post la morto de Saul, kiam David revenis de la
venkobato de Amalek, kaj David estis en Ciklag
de du tagoj, 2 okazis, ke en la tria tago iu viro venis
el la tendaro, de Saul, kaj liaj vestoj estis disŝiritaj
kaj terpolvo estis sur lia kapo; kaj kiam li alvenis al
David, li ĵetis sin sur la teron kaj adorkliniĝis. 3 Kaj
David diris al li: De kie vi venas? Kaj tiu diris al li: El la
tendaro de la Izraelidoj mi forsavis min. 4 Kaj David
diris al li: Kiel estis la afero? diru al mi, mi petas. Kaj
tiu diris, ke la popolo forkuris el la batalo, ke multaj
falis el la popolo kaj mortis, kaj ke ankaŭ Saul kaj lia
filo Jonatan mortis. 5 Kaj David diris al la junulo, kiu
raportis al li: Kiamaniere vi eksciis, ke mortis Saul
kaj lia filo Jonatan? 6 Kaj la junulo raportanta al li
diris: Okaze mi venis sur la monton Gilboa, kaj jen mi
vidis, ke Saul apogas sin sur sia glavo kaj la ĉaroj kaj
rajdantoj atingas lin. 7 Kaj li ekrigardis malantaŭen,
kaj ekvidis min kaj vokis min; kaj mi diris: Jen mi
estas. 8 Kaj li diris al mi: Kiu vi estas? Kaj mi diris al
li: Mi estas Amalekido. 9 Kaj li diris al mi: Stariĝu,
mi petas, super mi, kaj mortigu min, ĉar kaptis min
agonio; ĉar mia animo ĝis nun ankoraŭ estas en mi. 10
Tiam mi stariĝis super li kaj mortigis lin, ĉar mi sciis,
ke li ne vivos post sia falo; kaj mi prenis la kronon,
kiu estis sur lia kapo, kaj la brakornamon, kiu estis
sur lia brako, kaj mi alportis ilin al mia sinjoro ĉi tien.
11 Tiam David kaptis siajn vestojn kaj disŝiris ilin,
ankaŭ ĉiuj homoj, kiuj estis kun li. 12 Kaj ili funebris
kaj ploris kaj fastis ĝis la vespero, pro Saul, kaj pro
Jonatan, lia filo, kaj pro la popolo de la Eternulo, kaj
pro la domo de Izrael, ke ili falis de glavo. 13 Kaj
David diris al la junulo, kiu raportis al li: De kie vi
estas? Kaj tiu respondis: Mi estas filo de fremdulo
Amalekido. 14 Tiam David diris al li: Kiel vi ne timis
etendi vian manon, por pereigi la sanktoleiton de la
Eternulo? 15 Kaj David alvokis unu el la servantoj, kaj
diris: Alproksimiĝu, kaj frapu lin. Kaj tiu frapis lin, kaj
li mortis. 16 Kaj David diris al li: Via sango estu sur
via kapo; ĉar via buŝo atestas kontraŭ vi per tio, ke vi
diris: Mi mortigis la sanktoleiton de la Eternulo. 17
Kaj David eldiris la sekvantan funebran parolon pri
Saul kaj pri lia filo Jonatan 18 (kaj li ordonis instrui
al la Judoj la uzadon de pafarko, kiel estas skribite
en la libro de la Justulo): 19 La beleco de Izrael estas
mortigita sur viaj altaĵoj! Kiel falis la herooj! 20 Ne
sciigu en Gat, Ne anoncu sur la stratoj de Aŝkelon; Por
ke ne ĝoju la filinoj de la Filiŝtoj, Por ke ne ĝojkriu la
filinoj de la necirkumciditoj. 21 Montoj en Gilboa, Nek
roso nek pluvo estu sur vi, nek kampoj fruktodonaj;
Ĉar tie estas malhonorita la ŝildo de herooj, La ŝildo
de Saul, kvazaŭ li ne estus oleita per sankta oleo.
22 Sen sango de mortigitoj, sen sebo de fortuloj, La
pafarko de Jonatan neniam venis returne, Kaj la glavo
de Saul ne revenis vane. 23 Saul kaj Jonatan, amindaj
kaj ĉarmaj ĉe sia vivo, Eĉ ĉe sia morto ne disiĝis;
Pli rapidaj ili estis ol agloj, Pli fortaj ol leonoj. 24
Filinoj de Izrael, ploru pri Saul, Kiu vestis vin per
purpuro kun ornamaĵoj, Kiu metis orajn ornamojn sur
viajn vestojn. 25 Kiel falis herooj meze de la batalo!
Mortigita estas Jonatan sur viaj altaĵoj. 26 Mi malĝojas
pro vi, mia frato Jonatan; Vi estis al mi tre kara; Via
amo estis al mi pli kara, Ol la amo de virinoj. 27 Kiel
falis herooj, Kaj pereis batalaj armiloj!

2 Post tio David demandis la Eternulon, dirante:
Ĉu mi eniru en unu el la urboj de Jehuda? Kaj la
Eternulo diris al li: Eniru. Kaj David diris: Kien mi
eniru? Kaj Li respondis: En Ĥebronon. 2 Kaj David tien
eniris, kune kun siaj edzinoj, Aĥinoam, la Jizreelanino,
kaj Abigail, edzino de Nabal, la Karmelanino. 3 Ankaŭ
siajn virojn, kiuj estis kun li, David alkondukis, ĉiun
kun lia domo; kaj ili ekloĝis en la urboj de Ĥebron. 4
Tiam venis la viroj de Jehuda kaj sanktoleis tie Davidon
kiel reĝon super la domo de Jehuda. Kiam oni sciigis
al David, ke la loĝantoj de Jabeŝ en Gilead enterigis
Saulon, 5 David sendis senditojn al la loĝantoj de Jabeŝ
en Gilead, kaj dirigis al ili: Estu benataj de la Eternulo
pro tio, ke vi faris tiun favorkoraĵon al via sinjoro,
al Saul, kaj enterigis lin; 6 nun la Eternulo faru al
vi favorkoraĵon kaj justaĵon; kaj mi ankaŭ repagos
al vi tiun bonaĵon, kiun vi faris; 7 nun fortiĝu viaj
manoj, kaj estu kuraĝaj; ĉar mortis via sinjoro Saul,
sed jam min sanktoleis la Judoj kiel reĝon super ili. 8
Dume Abner, filo de Ner, militestro de Saul, prenis
Iŝ-Boŝeton, filon de Saul, kaj transkondukis lin en
Maĥanaimon, 9 kaj starigis lin kiel reĝon super Gilead
kaj super la Aŝuridoj kaj super Jizreel kaj super Efraim
kaj super Benjamen kaj super la tuta Izrael. 10 Iŝ-
Boŝet, filo de Saul, havis la aĝon de kvardek jaroj,
kiam li fariĝis reĝo de Izrael, kaj du jarojn li reĝis. Nur
la domo de Jehuda sekvis Davidon. 11 La daŭro de la
tempo, dum kiu David estis reĝo en Ĥebron super la

domo de Jehuda, estis sep jaroj kaj ses monatoj. 12
Kaj Abner, filo de Ner, kun la servantoj de Iŝ-Boŝet,
filo de Saul, eliris el Maĥanaim en Gibeonon. 13 Kaj
Joab, filo de Ceruja, kun la servantoj de David, eliris
kaj renkontiĝis kun ili ĉe la akvejo de Gibeon; kaj
sidiĝis unuj ĉe unu flanko de la akvejo, kaj la aliaj
ĉe la dua flanko de la akvejo. 14 Kaj Abner diris al
Joab: La junuloj leviĝu, kaj amuziĝu antaŭ ni. Kaj
Joab diris: Ili leviĝu. 15 Kaj leviĝis kaj eliris dek du
de la flanko de Benjamen kaj de Iŝ-Boŝet, filo de
Saul, kaj dek du el la servantoj de David. 16 Kaj ili
kaptis ĉiu la kapon de sia kontraŭulo kaj enpikis sian
glavon en la flankon de sia kontraŭulo, kaj ili falis
kune. Tial oni donis al tiu loko la nomon Kampo
de la Fortuloj en Gibeon. 17 Kaj fariĝis tre kruela
batalo en tiu tago; kaj frapitaj estis Abner kaj la
Izraelidoj antaŭ la servantoj de David. 18 Kaj tie
estis tri filoj de Ceruja: Joab kaj Abiŝaj kaj Asahel;
Asahel estis rapidpieda kiel gazelo sur la kampo. 19
Kaj Asahel postkuris Abneron, kaj, ne flankiĝante
dekstren nek maldekstren, sekvis Abneron. 20 Abner
turniĝis malantaŭen, kaj diris: Ĉu vi estas Asahel? Kaj
tiu respondis: Mi. 21 Tiam Abner diris al li: Flankeniĝu
dekstren aŭ maldekstren, kaj kaptu al vi unu el la
junuloj, kaj prenu al vi liajn armilojn. Sed Asahel
ne volis cedi de li. 22 Abner denove diris al Asahel:
Forcedu de mi; por kio mi batu vin sur la teron?
kaj kiel mi poste montros mian vizaĝon al via frato
Joab? 23 Sed tiu ne volis foriĝi. Tiam Abner ekbatis
lin per la malantaŭa fino de la lanco en la ventron
tiel, ke la lanco eliris tra lia malantaŭa parto; kaj
li tie falis, kaj mortis sur la sama loko. Kaj ĉiu, kiu
venis al la loko, kie Asahel falis kaj mortis, haltis.
24 Kaj Joab kaj Abiŝaj postkuris Abneron. Kiam la
suno malleviĝis, ili venis al la monteto Ama, kiu estas
kontraŭ Giaĥ sur la vojo al la dezerto Gibeona. 25 Kaj la
Benjamenidoj kolektiĝis ĉirkaŭ Abner kaj formis unu
taĉmenton kaj stariĝis sur la supro de unu monteto.
26 Tiam Abner ekkriis al Joab, kaj diris: Ĉu eterne
manĝados la glavo? ĉu vi ne scias, kiel maldolĉaj
estos la sekvoj? kiel longe vi ne ordonos al la popolo
ĉesigi la atakadon de siaj fratoj? 27 Kaj Joab respondis:
Kiel vivas la Eternulo, se vi ne estus elvokinta, tiam
ankoraŭ matene la popolo ĉesus atakadi ĉiu sian
fraton. 28 Kaj Joab ekblovis per trumpeto, kaj la tuta
popolo haltis kaj ne persekutis plu la Izraelidojn kaj
ne plu batalis. 29 Abner kaj liaj viroj marŝis sur la
ebenaĵo tiun tutan nokton kaj transiris Jordanon kaj
trairis la tutan Bitronon kaj venis en Maĥanaimon.
30 Kaj Joab revenis de la persekutado de Abner kaj
kolektis la tutan popolon; kaj mankis el la servantoj
de David dek naŭ viroj kaj Asahel. 31 Sed la servantoj
de David frapis el la Benjamenidoj kaj el la viroj de
Abner tricent sesdek virojn, kiuj mortis. 32 Kaj ili levis
Asahelon, kaj enterigis lin en la tombo de lia patro,
kiu estas en Bet-Leĥem. Kaj Joab kaj liaj viroj iris dum
la tuta nokto, kaj la mateno trafis ilin en Ĥebron.

3 Kaj la milito estis longedaŭra inter la domo de
Saul kaj la domo de David. Sed David fariĝadis
ĉiam pli forta, kaj la domo de Saul fariĝadis ĉiam
pli malforta. 2 Al David naskiĝis filoj en Ĥebron. Lia
unuenaskito estis Amnon, de Aĥinoam, la Jizreelanino;
3 lia dua filo estis Kilab, de Abigail, edzino de Nabal, la
Karmelanino; la tria, Abŝalom, de Maaĥa, filino de
Talmaj, reĝo de Geŝur; 4 la kvara, Adonija, filo de
Ĥagit; la kvina, Ŝefatja, filo de Abital; 5 la sesa, Jitream,
de Egla, edzino de David. Ĉi tiuj naskiĝis al David en
Ĥebron. 6 Dum la tempo, kiam estis milito inter la
domo de Saul kaj la domo de David, Abner subtenadis
la domon de Saul. 7 Saul havis kromvirinon, kies
nomo estis Ricpa, filino de Aja. Kaj Iŝ-Boŝet diris al
Abner: Kial vi envenis al la kromvirino de mia patro?
8 Tiam Abner forte ekkoleris pro la vortoj de Iŝ-Boŝet,
kaj li diris: Ĉu mi estas kapo de hundo, mi, kiu kontraŭ
Jehuda faras favorkoraĵon al la domo de via patro
Saul, al liaj fratoj kaj al liaj amikoj, kaj ne transdonis
vin en la manon de David? kaj vi riproĉas al mi hodiaŭ
krimon pro la virino! 9 Tiel kaj pli Dio punu Abneron,
se mi ne agos konforme al tio, kiel la Eternulo ĵuris
al David; 10 por forpreni la regnon de la domo de
Saul, kaj starigi la tronon de David super Izrael kaj
Jehuda, de Dan ĝis Beer-Ŝeba. 11 Kaj li ne povis plu
respondi al Abner eĉ unu vorton, ĉar li timis lin. 12
Tiam Abner sendis senditojn al David anstataŭ si, por
diri: Al kiu apartenas la lando? faru vian interligon
kun mi, kaj tiam mia mano estos kun vi, por turni al
vi la tutan Izraelon. 13 Kaj tiu diris: Bone, mi faros kun
vi interligon; nur unu aferon mi petos de vi, nome: vi
ne vidos mian vizaĝon, se vi antaŭe ne alkondukos
al mi Miĥalon, filinon de Saul, kiam vi venos, por
vidi mian vizaĝon. 14 Kaj David sendis senditojn al
Iŝ-Boŝet, filo de Saul, por diri: Donu mian edzinon
Miĥal, kiun mi edzinigis al mi per cent prepucioj de

Filiŝtoj. 15 Tiam Iŝ-Boŝet sendis, kaj prenis ŝin de la
edzo, de Paltiel, filo de Laiŝ. 16 Kaj ŝia edzo iris kun
ŝi, ne ĉesante plori pro ŝi ĝis Baĥurim; sed Abner
diris al li: Iru returne; kaj li iris returne. 17 Kaj Abner
ekparolis kun la plejaĝuloj de Izrael, dirante: Jam de
longe vi volas havi Davidon kiel reĝon super vi; 18
nun faru do tion; ĉar la Eternulo diris pri David jene:
Per la mano de Mia servanto David Mi savos Mian
popolon Izrael el la manoj de la Filiŝtoj kaj el la manoj
de ĉiuj iliaj malamikoj. 19 Ankaŭ al la oreloj de la
Benjamenidoj Abner parolis. Kaj Abner ankaŭ iris, por
diri al la oreloj de David en Ĥebron ĉion, kio plaĉas al
la Izraelidoj kaj al la tuta domo de Benjamen. 20 Kiam
Abner venis al David en Ĥebronon kaj kun li dudek
viroj, David faris por Abner kaj por liaj viroj festenon.
21 Kaj Abner diris al David: Mi leviĝos, kaj iros kaj
kunvenigos al mia sinjoro la reĝo la tutan Izraelon,
por ke ili faru kun vi interligon, kaj por ke vi reĝu
super ĉio, kiel deziros via animo. Kaj David forliberigis
Abneron, kaj li iris en paco. 22 Sed jen la servantoj de
David kaj Joab venis el batalo, kaj alportis kun si multe
da militakiro; Abner tiam jam ne estis kun David en
Ĥebron, ĉar ĉi tiu forliberigis lin kaj li foriris en paco.
23 Kiam venis Joab kun la tuta militistaro, kiu estis
kun li, oni sciigis al Joab, dirante: Abner, filo de Ner,
venis al la reĝo; kaj ĉi tiu forliberigis lin kaj li iris en
paco. 24 Tiam Joab venis al la reĝo, kaj diris: Kion vi
faris? jen Abner venis al vi; kial do vi forliberigis lin,
ke li foriris? 25 Vi konas ja Abneron, filon de Ner; nur
por tromplogi vin li venis, kaj por ekkoni ĉiujn viajn
elirojn kaj enirojn, kaj por ekscii ĉion, kion vi faras.
26 Kaj Joab eliris de David kaj sendis senditojn post
Abner, kaj ili revenigis lin de la puto Sira; kaj David ne
sciis pri tio. 27 Kiam Abner revenis Ĥebronon, Joab
kondukis lin en la mezon de la pordego, por paroli
kun li sekrete, kaj frapis lin tie en la ventron; kaj
li mortis, pro la sango de lia frato Asahel. 28 Kiam
David poste aŭdis pri tio, li diris: Senkulpa estas mi
kaj mia regno antaŭ la Eternulo por eterne pri la
sango de Abner, filo de Ner. 29 Ĝi falu sur la kapon de
Joab kaj de lia tuta patrodomo; ne manku en la domo
de Joab pusulo, nek leprulo, nek apoganta sin sur
bastono, nek falanta de glavo, nek havanta mankon
de pano. 30 Tiel Joab kaj lia frato Abiŝaj mortigis
Abneron pro tio, ke li mortigis Asahelon, ilian fraton,
en Gibeon dum la batalo. 31 Kaj David diris al Joab,
kaj al la tuta popolo, kiu estis kun li: Disŝiru viajn
vestojn kaj zonu vin per sakoj, kaj funebru pro Abner.
Kaj la reĝo David sekvis la mortintportilon. 32 Kaj
oni enterigis Abneron en Ĥebron; kaj la reĝo levis
sian voĉon kaj ploris super la tombo de Abner, kaj
ploris la tuta popolo. 33 Kaj la reĝo eldiris funebran
parolon pri Abner, kaj diris: Ĉu Abner devis morti
tiel, kiel mortas malnoblulo? 34 Viaj manoj ne estis
ligitaj, kaj viaj piedoj ne estis en katenoj; Vi falis,
kiel oni falas de krimuloj. Kaj ankoraŭ pli ploris pro
li la popolo. 35 Poste venis la tuta popolo, por igi
Davidon manĝi, dum estis ankoraŭ tago; sed David
ĵuris, dirante: Tiel kaj pli punu min Dio, se mi antaŭ la
sunsubiro gustumos panon aŭ ion ajn. 36 Kaj la tuta
popolo tion komprenis; kaj tio plaĉis al ĝi, tiel same,
kiel ĉio, kion faris la reĝo, plaĉis al la tuta popolo. 37
Kaj eksciis en tiu tago la tuta popolo kaj la tuta Izrael,
ke ne de la reĝo tio venis, ke oni mortigis Abneron,
filon de Ner. 38 Kaj la reĝo diris al siaj servantoj: Ĉu
vi ne scias, ke princo kaj grandulo falis hodiaŭ en
Izrael? 39 Sed mi hodiaŭ estas ankoraŭ malforta kaj
apenaŭ sanktoleita kiel reĝo, kaj tiuj homoj, la filoj de
Ceruja, estas pli fortaj ol mi; la Eternulo repagu al la
malbonaganto konforme al lia malbonago.

4 Kiam la filo de Saul aŭdis, ke mortis Abner en
Ĥebron, tiam liaj manoj malleviĝis kaj la tuta Izrael
konsterniĝis. 2 Du viroj taĉmentestroj estis ĉe la filo
de Saul; la nomo de unu estis Baana, kaj la nomo
de la dua Reĥab, filoj de Rimon, Beerotano, el la
Benjamenidoj; ĉar Beerot ankaŭ estis kalkulata kiel
apartenaĵo de la Benjamenidoj. 3 Sed la Beerotanoj
forkuris en Gitaimon kaj loĝis tie kiel fremduloj ĝis
nun. 4 De Jonatan, filo de Saul, restis filo, kiu havis
malsanajn piedojn. Li havis la aĝon de kvin jaroj, kiam
venis la sciigo pri Saul kaj Jonatan el Jizreel; kiam lia
vartistino prenis lin kaj ekkuris, kaj ŝi rapidis forkuri,
li falis kaj fariĝis lama. Lia nomo estis Mefiboŝet. 5
Reĥab kaj Baana, filoj de Rimon, la Beerotano, iris kaj
venis en la varmego de la tago en la domon de Iŝ-
Boŝet, kiam li kuŝis sian tagmezan kuŝadon. 6 Kaj jen
ili eniris en la mezon de la domo, kvazaŭ por preni
tritikon, kaj frapis lin en la ventron; poste Reĥab kaj
lia frato Baana forkuris. 7 Kiam ili eniris en la domon,
li kuŝis sur sia lito en sia dormoĉambro; tial ili frapis
lin kaj mortigis lin, kaj dehakis lian kapon, kaj prenis
lian kapon, kaj iris laŭ la vojo al la ebenaĵo dum la
tuta nokto. 8 Kaj ili alportis la kapon de Iŝ-Boŝet al

David en Ĥebronon, kaj diris al la reĝo: Jen estas
la kapo de Iŝ-Boŝet, filo de Saul, via malamiko, kiu
serĉis vian animon; la Eternulo donis al nia sinjoro, la
reĝo, venĝon hodiaŭ pro Saul kaj pro lia idaro. 9 Sed
David respondis al Reĥab kaj al lia frato Baana, filoj
de Rimon, la Beerotano, kaj diris al ili: Kiel vivas la
Eternulo, kiu savis mian animon el ĉiuj malfeliĉoj, 10
se tiun, kiu sciigis al mi, ke Saul mortis, kaj kiu pensis,
ke li estas agrabla sciiganto, mi kaptis kaj mortigis en
Ciklag, por rekompenci lin pro la sciigo: 11 kiel do oni
devas agi kun malpiaj homoj, kiuj mortigis homon
senkulpan en lia domo, sur lia lito? ĉu mi ne devas
repostuli lian sangon el viaj manoj, kaj ekstermi vin
de sur la tero? 12 Kaj David ordonis al la servantoj;
kaj ĉi tiuj ilin mortigis, kaj dehakis iliajn manojn kaj
piedojn, kaj pendigis ilin super la lageto en Ĥebron;
kaj la kapon de Iŝ-Boŝet oni prenis kaj enterigis en la
tombo de Abner en Ĥebron.

5 Kaj venis ĉiuj triboj de Izrael al David en Ĥebronon,
kaj diris jene: Jen ni estas via osto kaj via karno;
2 jam antaŭe, kiam Saul estis reĝo super ni, vi estis
la elkondukanto kaj enkondukanto de Izrael; kaj la
Eternulo diris al vi: Vi paŝtos Mian popolon Izrael,
kaj vi estos la estro super Izrael. 3 Kaj venis ĉiuj
plejaĝuloj de Izrael al la reĝo en Ĥebronon, kaj la
reĝo David faris kun ili interligon en Ĥebron antaŭ
la Eternulo; kaj ili sanktoleis Davidon reĝo super
Izrael. 4 La aĝon de tridek jaroj havis David, kiam li
fariĝis reĝo; kvardek jarojn li reĝis. 5 En Ĥebron li
reĝis super Jehuda sep jarojn kaj ses monatojn, kaj
en Jerusalem li reĝis tridek tri jarojn super la tuta
Izrael kaj Jehuda. 6 Kaj la reĝo kun siaj viroj iris al
Jerusalem, kontraŭ la Jebusidojn, la loĝantojn de tiu
lando. Sed ili diris al David: Vi ne eniros ĉi tien, ĉar
blinduloj kaj lamuloj vin rebatos; tio signifis: David ne
venos ĉi tien. 7 Sed David venkoprenis la fortikaĵon
Cion, tio estas, la urbon de David. 8 Kaj David diris en
tiu tago: Ĉiu, kiu frapas la Jebusidojn, ekstermu la
akvotubojn, kaj la blindulojn kaj la lamulojn, kiujn
malamas la animo de David. Tial oni diras: Blindulo
kaj lamulo ne venos en la domon. 9 Kaj David ekloĝis
en la fortikaĵo, kaj donis al ĝi la nomon: Urbo de
David. Kaj David konstruis ĉirkaŭe, komencante de
Milo kaj internen. 10 Kaj David fariĝadis ĉiam pli kaj
pli granda; kaj la Eternulo, Dio Cebaot, estis kun li. 11
Kaj Ĥiram, reĝo de Tiro, sendis senditojn al David, kaj
cedrajn arbojn, kaj ĉarpentistojn kaj masonistojn; kaj
ili konstruis domon al David. 12 Kaj David konsciis,
ke la Eternulo fortikigis lin kiel reĝon super Izrael,
kaj ke Li altigis lian regnon pro Sia popolo Izrael. 13
Kaj David prenis ankoraŭ kromvirinojn kaj edzinojn
el Jerusalem post sia veno el Ĥebron. Kaj naskiĝis al
David ankoraŭ filoj kaj filinoj. 14 Jen estas la nomoj de
tiuj, kiuj naskiĝis al li en Jerusalem: Ŝamua kaj Ŝobab
kaj Natan kaj Salomono 15 kaj Jibĥar kaj Eliŝua kaj
Nefeg kaj Jafia 16 kaj Eliŝama kaj Eljada kaj Elifelet.
17 Kiam la Filiŝtoj aŭdis, ke oni sanktoleis Davidon
reĝo super Izrael, ĉiuj Filiŝtoj iris, por serĉi Davidon.
David aŭdis pri tio, kaj eniris en la fortikaĵon. 18 Kaj la
Filiŝtoj venis kaj okupis lokon en la valo Refaim. 19
Kaj David demandis la Eternulon, dirante: Ĉu mi iru
kontraŭ la Filiŝtojn? ĉu Vi transdonos ilin en mian
manon? Kaj la Eternulo diris al David: Iru, ĉar Mi certe
transdonos la Filiŝtojn en vian manon. 20 Tiam David
venis al la loko Baal-Peracim, kaj David tie venkobatis
ilin; kaj li diris: La Eternulo disbatis miajn malamikojn
antaŭ mi, kiel oni disbatas akvon. Tial oni donis al
tiu loko la nomon Baal-Peracim. 21 Kaj ili lasis tie
siajn diojn, kaj forportis ilin David kaj liaj viroj. 22 Kaj
denove venis la Filiŝtoj kaj okupis lokon en la valo
Refaim. 23 Kaj kiam David demandis la Eternulon, Li
diris: Ne iru; turnu vin post ilin, kaj venu al ili de la
flanko de la morusarboj; 24 kaj kiam vi ekaŭdos la
sonon de paŝoj sur la supro de la morusarboj, tiam
ataku; ĉar tiam la Eternulo eliris antaŭ vi, por frapi
la tendaron de la Filiŝtoj. 25 Kaj David faris tiel, kiel
ordonis al li la Eternulo; kaj li venkobatis la Filiŝtojn
de Geba ĝis Gezer.

6 Kaj denove David kolektis ĉiujn elektitojn en Izrael,
tridek mil. 2 Kaj David, kaj la tuta popolo, kiu estis
kun li, leviĝis kaj iris el Baale-Jehuda, por venigi de
tie la keston de Dio, kiu estas nomata per la nomo de
la Eternulo Cebaot, kiu sidas sur la keruboj. 3 Kaj oni
veturigis la keston de Dio sur nova veturilo, kaj prenis
ĝin el la domo de Abinadab, kiu estis en Gibea. Kaj
Uza kaj Aĥjo, filoj de Abinadab, kondukis la novan
veturilon. 4 Kaj oni prenis ĝin el la domo de Abinadab
en Gibea kun la kesto de Dio, kaj Aĥjo iris antaŭ la
kesto. 5 Kaj David kaj la tuta domo de Izrael ludis
antaŭ la Eternulo per ĉiaj instrumentoj el cipreso, per
harpoj, psalteroj, tamburinoj, sistroj, kaj cimbaloj.
6 Kiam ili venis al la draŝejo de Naĥon, Uza etendis

sian manon al la kesto de Dio kaj ekkaptis ĝin, ĉar
la bovoj klinpuŝis ĝin. 7 Tiam ekflamis la kolero de
la Eternulo kontraŭ Uza, kaj Dio mortigis lin tie pro
la peko, kaj li mortis tie apud la kesto de Dio. 8 Kaj
afliktiĝis David pro tio, ke la Eternulo frapis Uzan, kaj
li donis al tiu loko la nomon Perec-Uza, ĝis la nuna
tago. 9 Kaj ektimis David la Eternulon en tiu tago, kaj
diris: Kiamaniere venos al mi la kesto de la Eternulo?
10 Kaj David ne volis transportigi al si la keston de
la Eternulo en la urbon de David, kaj David direktis
ĝin en la domon de Obed-Edom, la Gatano. 11 Kaj
la kesto de la Eternulo restis en la domo de Obed-
Edom, la Gatano, dum tri monatoj; kaj la Eternulo
benis Obed-Edomon kaj lian tutan domon. 12 Kaj oni
sciigis al la reĝo David, dirante: La Eternulo benis la
domon de Obed-Edom, kaj ĉion, kio apartenas al li,
pro la kesto de Dio. Tiam David iris, kaj transportis la
keston de Dio el la domo de Obed-Edom en la urbon
de David kun ĝojo. 13 Kaj ĉiufoje, kiam la portantoj de
la kesto de la Eternulo trapaŝis ses paŝojn, li oferbuĉis
bovon kaj grasan ŝafon. 14 Kaj David dancis per ĉiuj
fortoj antaŭ la Eternulo, kaj David estis zonita per
lina efodo. 15 Kaj David kaj la tuta domo de Izrael
kondukis la keston de la Eternulo kun ĝojkriado kaj
trumpetado. 16 Kiam la kesto de la Eternulo venis en
la urbon de David, Miĥal, la filino de Saul, rigardis tra
la fenestro; kaj kiam ŝi vidis, ke la reĝo David saltas
kaj dancas antaŭ la Eternulo, ŝi ekmalestimis lin en sia
koro. 17 Kaj oni alportis la keston de la Eternulo, kaj
metis ĝin sur ĝian lokon meze de la tendo, kiun David
starigis por ĝi; kaj David alportis antaŭ la Eternulo
bruloferojn kaj pacoferojn. 18 Kiam David finis la
oferadon de la bruloferoj kaj de la pacoferoj, li benis
la popolon en la nomo de la Eternulo Cebaot. 19 Kaj
li disdonis al la tuta popolo, al la tuta amaso de la
Izraelidoj, kiel al la viroj, tiel ankaŭ al la virinoj, al
ĉiu po unu bulo da pano, po unu porcio da viando,
kaj po unu peniko da sekvinberoj. Kaj la tuta popolo
iris ĉiu al sia domo. 20 Kiam David revenis, por beni
sian domon, Miĥal, filino de Saul, eliris renkonte al
David, kaj diris: Kiel majesta estis hodiaŭ la reĝo de
Izrael, kiu elmontris sin hodiaŭ antaŭ la okuloj de
la sklavinoj de siaj servantoj, kiel sin elmontras iu
el la publikaj dancistoj! 21 Sed David diris al Miĥal:
Antaŭ la Eternulo, kiu preferis min antaŭ via patro
kaj antaŭ lia tuta domo, ordonante al mi esti estro
super la popolo de la Eternulo, super Izrael, antaŭ la
Eternulo mi ludis. 22 Kaj mi senvalorigos min ankoraŭ
pli ol tio, kaj mi humiligos min antaŭ miaj okuloj;
kaj tamen inter la sklavinoj, pri kiuj vi parolis, mi
estos honorata. 23 Kaj Miĥal, la filino de Saul, ne havis
infanojn ĝis la tago de ŝia morto.

7 Kiam la reĝo loĝis en sia domo, kaj la Eternulo
donis al li ripozon rilate ĉiujn liajn malamikojn
ĉirkaŭe, 2 la reĝo diris al la profeto Natan: Vidu, mi
loĝas en domo cedroligna, kaj la kesto de Dio restas
inter tapiŝoj. 3 Kaj Natan diris al la reĝo: Ĉion, kio
estas en via koro, iru kaj faru, ĉar la Eternulo estas kun
vi. 4 Sed en tiu sama nokto aperis vorto de la Eternulo
al Natan, dirante: 5 Iru, kaj diru al Mia servanto David:
Tiele diris la Eternulo: Ĉu vi konstruos al Mi domon
por Mia loĝado? 6 Ĉar Mi ne loĝis en domo de post tiu
tago, kiam Mi elkondukis la Izraelidojn el Egiptujo,
ĝis la nuna tempo; sed Mi migradis en tendo kaj en
tabernaklo. 7 Kien ajn Mi iris kun ĉiuj Izraelidoj, ĉu Mi
diris eĉ unu vorton al iu el la triboj de Izrael, al kiu Mi
ordonis paŝti Mian popolon Izrael, dirante: Kial vi ne
konstruis por Mi cedrolignan domon? 8 Kaj nun diru
jenon al Mia servanto David: Tiele diras la Eternulo
Cebaot: Mi prenis vin el ŝafejo, de ŝafoj, por ke vi estu
estro super Mia popolo Izrael; 9 kaj Mi estis kun vi ĉie,
kien vi iris; kaj Mi ekstermis ĉiujn viajn malamikojn
antaŭ vi, kaj Mi faris al vi grandan nomon, egalan
al la nomoj de la potenculoj sur la tero; 10 kaj Mi
aranĝis lokon por Mia popolo Izrael; kaj Mi plantis
ĝin, ke ĝi loĝu trankvile sur sia loko kaj ne tremu
plu; kaj malbonuloj ne plu premos ĝin, kiel antaŭe;
11 kaj de post tiu tempo, kiam Mi starigis juĝistojn
super Mia popolo Izrael kaj donis al vi trankvilecon
rilate ĉiujn viajn malamikojn, la Eternulo sciigis al
vi, ke domon konstruos al vi la Eternulo. 12 Kiam
finiĝos viaj tagoj kaj vi kuŝiĝos kun viaj patroj, Mi
starigos post vi vian idon, kiu eliros el via ventro; kaj
Mi fortikigos lian regnon. 13 Li konstruos domon al
Mia nomo; kaj Mi fortikigos la tronon de lia regno por
eterne. 14 Mi estos al li patro, kaj li estos al Mi filo; se
li faros malbonagon, Mi punos lin per vergo de homoj
kaj per batoj de homoj. 15 Kaj Mia favorkoreco ne
deturniĝos de li, kiel Mi deturnis ĝin de Saul, kiun Mi
forigis antaŭ vi. 16 Kaj fidinda estos via domo kaj via
regno eterne antaŭ vi; via trono estos fortikigita por
eterne. 17 Konforme al ĉiuj ĉi tiuj vortoj kaj konforme
al ĉi tiu tuta vizio Natan parolis al David. 18 Kaj venis

la reĝo David kaj sidiĝis antaŭ la Eternulo, kaj diris:
Kiu estas mi, mia Sinjoro, ho Eternulo, kaj kio estas
mia domo, ke Vi venigis min ĝis ĉi tie? 19 Sed eĉ
tio estis nesufiĉa antaŭ Vi, mia Sinjoro, ho Eternulo,
kaj Vi parolis pri la domo de Via sklavo eĉ por la
malproksima estonteco, laŭ la maniero de homo, mia
Sinjoro, ho Eternulo. 20 Kion pli David povas diri al
Vi? Vi konas ja Vian sklavon, mia Sinjoro, ho Eternulo.
21 Pro Via vorto kaj laŭ Via koro Vi faris tiun tutan
grandaĵon, por montri al Via sklavo. 22 Pro tio Vi
estas granda, ho Dio Eternulo; ĉar ne ekzistas simila al
Vi, kaj ne ekzistas Dio krom Vi, laŭ ĉio, kion ni aŭdis
per niaj oreloj. 23 Kaj kiu estas simila al Via popolo
Izrael, la sola popolo sur la tero, koncerne kiun Dio
iris, por elaĉeti ĝin al Si kiel popolon, kaj fari al Si
nomon, kaj fari grandaĵojn por Vi kaj timindaĵojn
por Via tero, antaŭ Via popolo, kiun Vi liberigis al
Vi el Egiptujo, de ĝiaj popoloj kaj ĝiaj dioj? 24 Kaj Vi
starigis al Vi Vian popolon Izrael, por ke ĝi estu por
Vi popolo por eterne; kaj Vi, ho Eternulo, faris Vin
Dio por ĝi. 25 Kaj nun, ho Dio Eternulo, la vorton, kiun
Vi diris pri Via sklavo kaj pri lia domo, fortikigu por
eterne, kaj Vi agu tiel, kiel Vi diris. 26 Kaj granda estu
Via nomo por eterne, por ke oni diru: La Eternulo
Cebaot estas Dio super Izrael. Kaj la domo de Via
sklavo David estu fortikigita antaŭ Vi. 27 Ĉar Vi, ho
Eternulo Cebaot, Dio de Izrael, sciigis al la orelo de
Via sklavo, dirante: Domon mi konstruos al vi; tial
Via sklavo trovis kuraĝon en sia koro preĝi al Vi ĉi
tiun preĝon. 28 Kaj nun, mia Sinjoro, ho Eternulo, Vi
estas Dio, kaj Viaj vortoj estas veraj; kaj Vi diris pri
Via sklavo ĉi tiun bonaĵon. 29 Nun komencu beni la
domon de Via sklavo, ke ĝi restu eterne antaŭ Vi; ĉar
Vi, mia Sinjoro, ho Eternulo, parolis; kaj per Via beno
estos benita la domo de Via sklavo eterne.

**8** Post tio okazis, ke David venkobatis la Filiŝtojn
kaj humiligis ilin, kaj David prenis la ĉefurbon
el la manoj de la Filiŝtoj. 2 Li ankaŭ venkobatis la
Moabidojn, kaj, kuŝiginte ilin sur la tero, li mezuris
ilin per ŝnuro; du partojn li mezuris por mortigi, kaj
unu plenan mezuron por restigi vivaj. Kaj la Moabidoj
submetiĝis al David kaj alportis tributojn. 3 Kaj David
venkobatis Hadadezeron, filon de Reĥob, reĝon de
Coba, kiam tiu iris, por restarigi sian regadon super
la rivero Eŭfrato. 4 Kaj David venkoprenis de li mil
sepcent rajdantojn kaj dudek mil piedirantojn; kaj
David lamigis ĉiujn ĉarĉevalojn, sed restigis el ili por
cent ĉaroj. 5 La Sirianoj Damaskaj venis, por helpi
al Hadadezer, reĝo de Coba; sed David venkobatis
el la Sirianoj dudek du mil homojn. 6 Kaj David
restigis garnizonojn en la Damaska Sirio, kaj la Sirianoj
submetiĝis al David kaj alportis tributojn. Kaj la
Eternulo helpis al David ĉie, kien li iris. 7 Kaj David
prenis la orajn ŝildojn, kiujn havis sur si la servantoj
de Hadadezer, kaj alportis ilin en Jerusalemon. 8 Kaj el
Betaĥ kaj el Berotaj, urboj de Hadadezer, la reĝo David
prenis tre multe da kupro. 9 Kiam Toi, reĝo de Ĥamat,
aŭdis, ke David venkobatis la tutan militistaron de
Hadadezer, 10 tiam Toi sendis sian filon Joram al la
reĝo David, por saluti lin, kaj gratuli lin pro tio, ke
li militis kontraŭ Hadadezer kaj venkobatis lin (ĉar
Toi estis en milito kontraŭ Hadadezer); kaj li havis
en siaj manoj vazojn arĝentajn kaj vazojn orajn kaj
vazojn kuprajn. 11 Ilin ankaŭ la reĝo David dediĉis
al la Eternulo, kune kun la arĝento kaj oro, kiun li
dediĉis el tio, kion li akiris de ĉiuj nacioj, kiujn li
venkis: 12 de la Sirianoj, de Moab, de la Amonidoj, de
la Filiŝtoj, kaj de Amalek, kaj el la militakiro, kiun li
ricevis de Hadadezer, filo de Reĥob kaj reĝo de Coba.
13 Kaj David faris al si nomon, kiam li revenis post
la venkobato de la Sirianoj en la Valo de Salo, en la
nombro de dek ok mil homoj. 14 Kaj li starigis en
Edomujo garnizonojn, en la tuta Edomujo li starigis
garnizonojn; kaj ĉiuj Edomidoj submetiĝis al David.
Kaj la Eternulo helpis al David ĉie, kien li iris. 15
Kaj David reĝis super la tuta Izrael, kaj David faradis
juĝon kaj justecon al sia tuta popolo. 16 Joab, filo de
Ceruja, estis estro de la militistaro; Jehoŝafat, filo de
Aĥilud, estis kronikisto; 17 Cadok, filo de Aĥitub, kaj
Aĥimeleĥ, filo de Ebjatar, estis pastroj; kaj Seraja estis
skribisto; 18 Benaja, filo de Jehojada, estis super la
Keretidoj kaj la Peletidoj; kaj la filoj de David estis
pastroj.

**9** Kaj David diris: Ĉu ekzistas ankoraŭ iu, kiu restis el
la domo de Saul, ke mi povu fari al li favorkoraĵon
pro Jonatan? 2 El la domo de Saul estis servanto, kies
nomo estis Ciba; kaj oni vokis lin al David, kaj la reĝo
diris al li: Ĉu vi estas Ciba? Kaj tiu respondis: Mi, via
sklavo. 3 Tiam la reĝo diris: Ĉu ekzistas ankoraŭ iu el
la domo de Saul, ke mi povu fari al li favorkoraĵon
en la nomo de Dio? Kaj Ciba diris al la reĝo: Ekzistas
ankoraŭ filo de Jonatan, lamulo. 4 Kaj la reĝo diris al

li: Kie li estas? Kaj Ciba diris al la reĝo: Jen li estas
en la domo de Maĥir, filo de Amiel, en Lo-Debar. 5
Tiam la reĝo David sendis, kaj venigis lin el la domo
de Maĥir, filo de Amiel, el Lo-Debar. 6 Kaj venis
Mefiboŝet, filo de Jonatan, filo de Saul, al David, kaj
ĵetis sin vizaĝaltere kaj adorkliniĝis. Kaj David diris:
Mefiboŝet! Kaj tiu diris: Jen mi estas, via sklavo. 7
Kaj David diris al li: Ne timu, ĉar mi estos por vi
favorkora pro via patro Jonatan, kaj mi redonos al
vi ĉiujn kampojn de via patro Saul, kaj vi manĝados
ĉiam ĉe mia tablo. 8 Kaj tiu adorkliniĝis, kaj diris: Kio
estas via sklavo, ke vi vin turnas al senviva hundo,
kiel mi estas? 9 Kaj la reĝo alvokis Ciban, la servanton
de Saul, kaj diris al li: Ĉion, kio apartenis al Saul kaj al
lia tuta domo, mi donas al la filo de via sinjoro; 10
prilaboradu do por li la teron, vi kaj viaj filoj kaj viaj
servantoj, kaj rikoltadu, por ke la filo de via sinjoro
havu panon por manĝado; sed Mefiboŝet, filo de via
sinjoro, manĝados ĉiam ĉe mia tablo. Kaj Ciba havis
dek kvin filojn kaj dudek servantojn. 11 Kaj Ciba diris
al la reĝo: Ĉion, kion mia sinjoro la reĝo ordonas al
sia sklavo, via sklavo faros. Kaj Mefiboŝet manĝados
ĉe mia tablo egale al la filoj de la reĝo. 12 Mefiboŝet
havis malgrandan filon, kies nomo estis Miĥa. Kaj
ĉiuj, kiuj loĝis en la domo de Ciba, estis servantoj al
Mefiboŝet. 13 Kaj Mefiboŝet loĝis en Jerusalem, ĉar li
ĉiam manĝadis ĉe la tablo de la reĝo. Kaj li estis lama
je siaj ambaŭ piedoj.

**10** Okazis poste, ke mortis la reĝo de la Amonidoj,
kaj lia filo Ĥanun fariĝis reĝos anstataŭ li. 2
Tiam David diris: Mi estos favorkora al Ĥanun, filo de
Naĥaŝ, konforme al tio, kiel lia patro agis favorkore
koncerne min. Kaj David sendis, por konsoli lin
per siaj servantoj pri lia patro. Kaj la servantoj de
David venis en la landon de la Amonidoj. 3 Sed
la eminentuloj de la Amonidoj diris al sia sinjoro
Ĥanun: Ĉu efektive David deziras honori vian patron
antaŭ vi, ke li sendis al vi konsolantojn? ĉu ne por
pristudi la urbon, esplorrigardi kaj ruinigi ĝin, David
sendis al vi siajn servantojn? 4 Tiam Ĥanun prenis
la servantojn de David, kaj forrazis al ili duonon de
la barbo, kaj detranĉis iliajn vestojn ĝis duono, ĝis
la lumboj, kaj foririgis ilin. 5 Kiam oni tion raportis
al David, li sendis al ili renkonte, ĉar tiuj homoj tre
hontis. Kaj la reĝo diris: Restu en Jeriĥo, ĝis rekreskos
viaj barboj, kaj tiam revenu. 6 Kiam la Amonidoj vidis,
ke ili indignigis Davidon, tiam la Amonidoj sendis kaj
dungis Sirianojn el Bet-Reĥob kaj Sirianojn el Coba,
dudek mil piedirantojn, kaj de la reĝo de Maaĥa mil
homojn kaj de Tob dek du mil homojn. 7 Kiam David
aŭdis pri tio, li sendis Joabon kaj la tutan armeon da
kuraĝuloj. 8 Kaj eliris la Amonidoj kaj batalaranĝiĝis
ĉe la enirejo de la pordego; kaj la Sirianoj el Coba kaj
el Reĥob kaj la viroj de Tob kaj de Maaĥa estis aparte,
sur la kampo. 9 Kiam Joab vidis, ke li havos kontraŭ si
batalon antaŭe kaj malantaŭe, li faris elekton el ĉiuj
plejbravuloj en Izrael kaj batalaranĝis ilin kontraŭ
la Sirianoj; 10 kaj la ceteran parton de la popolo
li komisiis al sia frato Abiŝaj, kaj batalaranĝis ilin
kontraŭ la Amonidoj. 11 Kaj li diris: Se la Sirianoj
superfortos min, tiam vi donos al mi helpon; sed se
la Amonidoj superfortos vin, tiam mi iros, por helpi
vin. 12 Estu kuraĝa, kaj ni tenu nin forte por nia
popolo kaj por la urboj de nia Dio; kaj la Eternulo faru
tion, kio plaĉos al Li. 13 Kaj Joab, kun la popolo, kiu
estis kun li, komencis la batalon kontraŭ la Sirianoj;
kaj ĉi tiuj forkuris antaŭ li. 14 Kiam la Amonidoj
vidis, ke la Sirianoj forkuris, ili ankaŭ forkuris antaŭ
Abiŝaj, kaj foriris en la urbon. Tiam Joab returnis sin
de la Amonidoj, kaj venis Jerusalemon. 15 Kiam la
Sirianoj vidis, ke ili estas venkobatitaj de la Izraelidoj,
ili kolektiĝis en unu loko. 16 Kaj Hadadezer sendis,
kaj elirigis la Sirianojn transriverajn; kaj ili venis
en Ĥelamon; kaj Ŝobaĥ, militestro de Hadadezer,
ilin kondukis. 17 Kiam tio estis raportita al David, li
kolektis ĉiujn Izraelidojn, kaj transiris Jordanon kaj
venis en Ĥelamon. Kaj la Sirianoj aranĝis sin kontraŭ
David kaj ekbatalis kontraŭ li. 18 Kaj la Sirianoj
forkuris antaŭ Izrael, kaj David mortigis el la Sirianoj
sepcent ĉaristojn kaj kvardek mil rajdantojn; ankaŭ
Ŝobaĥon, la militestron, li frapis, kaj tiu mortis tie. 19
Kiam ĉiuj reĝoj, kiuj servis Hadadezeron, vidis, ke ili
estas venkobatitaj de la Izraelidoj, ili faris pacon kun
la Izraelidoj kaj submetiĝis al ili. Kaj la Sirianoj timis
helpi plu al la Amonidoj.

**11** Post unu jaro, en la tempo, kiam la reĝoj
eliras milite, David sendis Joabon kune kun siaj
servantoj kaj kun ĉiuj Izraelidoj; kaj ili faris ruinigadon
inter la Amonidoj, kaj sieĝis Raban. Sed David restis
en Jerusalem. 2 Okazis, ke vespere David leviĝis de
sia kuŝejo kaj ekpromenis sur la tegmento de la reĝa
domo; kaj li ekvidis de la tegmento virinon, kiu sin
lavis; kaj la virino estis tre belaspekta. 3 Kaj David

sendis, por demandi pri la virino; kaj oni diris al
li, ke ŝi estas Bat-Ŝeba, filino de Eliam, kaj edzino
de Urija, la Ĥetido. 4 Tiam David sendis senditojn,
por preni ŝin; kaj ŝi venis al li, kaj li kuŝis kun ŝi;
kiam ŝi repuriĝis de sia malpureco, ŝi revenis en sian
domon. 5 Kaj la virino gravediĝis, kaj ŝi sendis, por
sciigi Davidon, dirante: Mi gravediĝis. 6 Tiam David
sendis al Joab, por diri: Sendu al mi Urijan, la Ĥetidon.
Kaj Joab sendis Urijan al David. 7 Kiam Urija venis
al li, David demandis pri la farto de Joab kaj pri la
farto de la popolo kaj pri la sukceso de la milito. 8
Kaj David diris al Urija: Iru en vian domon, kaj lavu
viajn piedojn. Kaj Urija eliris el la domo de la reĝo,
kaj lin sekvis donacoj de la reĝo. 9 Sed Urija dormis
ĉe la enirejo de la domo de la reĝo, kune kun ĉiuj
servantoj de lia sinjoro, kaj li ne iris en sian domon.
10 Kaj oni raportis al David, dirante: Urija ne iris
en sian domon. Tiam David diris al Urija: Vi venis
ja de la vojo; kial do vi ne iris en vian domon? 11
Kaj Urija respondis al David: La kesto kaj Izrael kaj
Jehuda troviĝas en tendoj, kaj mia sinjoro Joab kaj la
servantoj de mia sinjoro bivakas sur la kampo; kaj ĉu
mi irus en mian domon, por manĝi kaj trinki, kaj kuŝi
kun mia edzino? mi ĵuras per via vivo kaj per la vivo
de via animo, ke mi ne faros tion. 12 Tiam David diris
al Urija: Restu ĉi tie ankoraŭ hodiaŭ, kaj morgaŭ mi
forliberigos vin. Kaj Urija restis en Jerusalem tiun
tagon kaj la sekvantan. 13 Kaj David invitis lin, ke
li manĝu kaj trinku ĉe li, kaj ebriigis lin. Vespere li
eliris, por dormi sur sia kuŝejo kun la servantoj de
sia sinjoro, sed en sian domon li ne iris. 14 Matene
David skribis leteron al Joab, kaj sendis ĝin per Urija.
15 Kaj en la letero li skribis jenon: Metu Urijan en la
fronton de la plej forta batalo, kaj deturniĝu de li, ke
li estu frapita kaj mortu. 16 Tial, kiam Joab sieĝis la
urbon, li metis Urijan sur la lokon, pri kiu li sciis, ke
tie estas la plej fortaj viroj. 17 Kiam la loĝantoj de
la urbo eliris kaj ekbatalis kontraŭ Joab, falis kelka
nombro el la servantoj de David; kaj mortis ankaŭ
Urija, la Ĥetido. 18 Joab sendis kaj raportigis al David
ĉiujn cirkonstancojn de la batalo. 19 Kaj al la sendito
li donis jenan ordonon: Kiam vi finos raporti al la
reĝo ĉiujn cirkonstancojn de la batalo, 20 kaj la reĝo
ekkoleros, kaj diros: Kial vi alproksimiĝis al la urbo,
por batali? ĉu vi ne sciis, ke oni pafos de la muro?
21 kiu mortigis Abimeleĥon, filon de Jerubeŝet? ĉu
ne virino ĵetis sur lin de la muro muelŝtonon, ke li
mortis en Tebec? kial vi alproksimiĝis al la muro?
tiam diru: Ankaŭ via servanto Urija, la Ĥetido, mortis.
22 La sendito iris, kaj venis kaj raportis al David ĉion,
por kio sendis lin Joab. 23 Kaj la sendito diris al David:
Kiam tiuj homoj montriĝis pli fortaj ol ni kaj eliris
kontraŭ nin sur la kampon, ni komencis premi ilin al
la enirejo en la pordegon; 24 tiam la pafistoj pafis sur
viajn servantojn de sur la muro, kaj pereis kelkaj el la
servantoj de la reĝo, kaj ankaŭ via servanto Urija, la
Ĥetido, mortis. 25 Tiam David diris al la sendito: Tiel
diru al Joab: Ne afliktiĝu pro tio, ke la glavo formanĝas
jen tiun, jen alian; plifortigu vian militon kontraŭ la
urbo kaj detruu ĝin, kaj estu kuraĝa. 26 Kiam la edzino
de Urija aŭdis, ke mortis ŝia edzo Urija, ŝi funebris
pro sia edzo. 27 Kiam pasis la funebro, David sendis,
kaj prenis ŝin en sian domon; kaj ŝi fariĝis lia edzino,
kaj ŝi naskis al li filon. Sed la faro, kiun faris David,
malplaĉis al la Eternulo.

12 Kaj la Eternulo sendis al David Natanon, kaj ĉi
tiu venis al li, kaj diris al li: En unu urbo estis du
viroj, unu riĉulo kaj la dua malriĉulo; 2 la riĉulo havis
tre multe da ŝafoj kaj da bovoj; 3 kaj la malriĉulo
havis nenion, krom unu malgranda ŝafeto, kiun li
aĉetis kaj nutris, kaj ĝi elkreskis ĉe li kaj ĉe liaj infanoj
kune kun ili; el lia peco ĝi manĝadis, el lia kaliko ĝi
trinkadis, kaj sur lia sino ĝi dormadis, kaj ĝi estis por
li kiel filino. 4 Sed venis gasto al la riĉa homo, kaj ĉi
tiu domaĝis preni el siaj ŝafoj aŭ el siaj bovoj, por
prepari ion por la gasto, kiu venis al li, kaj li prenis
la ŝafeton de la viro malriĉa, kaj preparis ĝin por la
homo, kiu venis al li. 5 Tiam forte ekflamis la kolero
de David kontraŭ tiu homo, kaj li diris al Natan: Mi
ĵuras per la Eternulo, ke morti devas la homo, kiu
tion faris; 6 kaj pro la ŝafeto li repagu kvaroble, pro
tio, ke li faris tion kaj ke li agis senkompate. 7 Tiam
Natan diris al David: Vi estas tiu homo. Tiele diris la
Eternulo, Dio de Izrael: Mi sanktoleis vin reĝo super
Izrael, kaj Mi savis vin el la mano de Saul, 8 kaj Mi
donis al vi la domon de via sinjoro kaj la edzinojn
de via sinjoro sur vian sinon, kaj Mi donis al vi la
domon de Izrael kaj Jehuda; kaj se tio ne sufiĉus, Mi
aldonus ankoraŭ tion kaj alian. 9 Kial do vi malŝatis la
vorton de la Eternulo, farante malbonon antaŭ Liaj
okuloj? Urijan, la Ĥetidon, vi mortigis per glavo, kaj
lian edzinon vi prenis al vi kiel edzinon, post kiam
vi lin mortigis per glavo de la Amonidoj. 10 Nun ne

malaperos el via domo la glavo eterne, pro tio, ke vi
malŝatis Min, kaj prenis la edzinon de Urija, la Ĥetido,
ke ŝi estu via edzino. 11 Tiele diris la Eternulo: Jen Mi
venigos sur vin malbonon el via domo; kaj Mi prenos
viajn edzinojn antaŭ viaj okuloj, kaj fordonos al via
konkuranto, kaj li kuŝos kun viaj edzinoj antaŭ ĉi tiu
suno. 12 Ĉar vi agis sekrete; sed Mi faros tiun aferon
antaŭ la tuta Izrael kaj antaŭ la suno. 13 Tiam David
diris al Natan: Mi pekis antaŭ la Eternulo. Kaj Natan
diris al David: La Eternulo forigis vian pekon, vi ne
mortos; 14 sed ĉar vi per tiu faro incitis la malamikojn
de la Eternulo, tial la filo, kiu naskiĝis al vi, mortos.
15 Kaj Natan iris en sian domon. Kaj la Eternulo frapis
la infanon, kiun la edzino de Urija naskis al David,
kaj ĝi danĝere malsaniĝis. 16 Kaj David ekpreĝis al la
Eternulo pri la infano; kaj David fastis, kaj li eniris, kaj
pasigis la nokton sur la tero. 17 Kaj ekinsistis super
li la plejaĝuloj de lia domo, por igi lin leviĝi de la
tero; sed li ne volis, kaj li ne manĝis kun ili. 18 En la
sepa tago la infano mortis. Kaj la servantoj de David
timis sciigi al li, ke la infano mortis; ĉar ili pensis:
Jen dum la infano ankoraŭ vivis, ni parolis al li, kaj li
ne aŭskultis nian voĉon; kiel do ni diros al li, ke la
infano mortis? li faros ian malbonon. 19 Sed kiam
David vidis, ke liaj servantoj murmuretas inter si, li
komprenis, ke la infano mortis; kaj David diris al siaj
servantoj: Ĉu la infano mortis? Kaj ili respondis: Ĝi
mortis. 20 Tiam David leviĝis de la tero, lavis sin kaj
oleis sin kaj ŝanĝis siajn vestojn, kaj iris en la domon
de la Eternulo, kaj adorkliniĝis. Poste li venis en sian
domon; li petis, ke oni donu al li panon, kaj li manĝis.
21 Tiam diris al li liaj servantoj: Kion signifas tio, kion
vi faris? dum la infano estis ankoraŭ vivanta, vi fastis
kaj ploris; kaj kiam la infano mortis, vi leviĝis kaj
manĝis! 22 Kaj li respondis: Dum la infano ankoraŭ
vivis, mi fastis kaj ploris; ĉar mi pensis: Kiu scias?
eble la Eternulo indulgos min kaj la infano vivos. 23
Sed nun ĝi mortis; por kio do mi fastos? ĉu mi povas
ankoraŭ revenigi ĝin? mi iros al ĝi, sed ĝi ne revenos
al mi. 24 Kaj David konsolis sian edzinon Bat-Ŝeba,
kaj envenis al ŝi kaj kuŝis kun ŝi; kaj ŝi naskis filon,
kaj li donis al li la nomon Salomono; kaj la Eternulo
lin amis. 25 Kaj li transdonis lin en la manojn de la
profeto Natan; ĉi tiu donis al li la nomon Jedidja,
pro la Eternulo. 26 Joab ekmilitis kontraŭ Raba de
la Amonidoj, kaj venkoprenis la reĝan urbon. 27 Kaj
Joab sendis senditojn al David, kaj dirigis: Mi militis
kontraŭ Raba, kaj mi venkoprenis la urbon de akvoj;
28 nun kolektu la reston de la popolo, kaj sieĝu la
urbon kaj prenu ĝin; ĉar alie, se mi prenus la urbon,
oni nomus ĝin per mia nomo. 29 Tiam David kolektis
la tutan popolon, kaj iris al Raba, kaj militis kontraŭ
ĝi kaj prenis ĝin. 30 Kaj li prenis la kronon de Malkam
de lia kapo; ĝi havis la pezon de kikaro da oro; en ĝi
estis multekosta ŝtono, kiu transiris sur la kapon de
David. Kaj da militakiraĵo li elportis el la urbo tre
multe. 31 Kaj la popolon, kiu tie estis, li elirigis, kaj
metis ĝin al segiloj kaj al feraj draŝiloj kaj al feraj
hakiloj kaj forkondukis al brikfarejoj. Tiele li agis kun
ĉiuj urboj de la Amonidoj. Kaj David kaj la tuta popolo
revenis Jerusalemon.

13 Poste okazis jeno: Abŝalom, filo de David, havis
belan fratinon, kies nomo estis Tamar; ŝin ekamis
Amnon, filo de David. 2 Kaj Amnon suferis multe kaj
preskaŭ malsaniĝis pro sia fratino Tamar; ĉar ŝi estis
virgulino, kaj al Amnon ŝajnis malfacile fari ion al ŝi.
3 Sed Amnon havis amikon, kies nomo estis Jonadab,
filo de Ŝimea, frato de David; kaj Jonadab estis homo
tre saĝa. 4 Kaj li diris al li: Kial vi tiel malgrasiĝas, ho
reĝido, kun ĉiu tago? ĉu vi ne diros al mi? Kaj Amnon
diris al li: Tamaron, fratinon de mia frato Abŝalom, mi
amas. 5 Tiam Jonadab diris al li: Kuŝiĝu en vian liton,
kaj ŝajnigu vin malsana; kaj kiam venos via patro, por
vidi vin, diru al li: Mi petas, ke mia fratino Tamar
venu, kaj ŝi donu al mi manĝi kaj ŝi pretigu antaŭ
mi la manĝaĵon, por ke mi vidu kaj mi manĝu el ŝiaj
manoj. 6 Amnon kuŝiĝis, kaj ŝajnigis sin malsana;
kaj venis la reĝo, por vidi lin, kaj Amnon diris al la
reĝo: Mi petas, ke venu mia fratino Tamar, kaj ke
ŝi pretigu antaŭ miaj okuloj du kuketojn, por ke mi
manĝu el ŝiaj manoj. 7 Tiam David sendis al Tamar
en la domon, por diri: Iru, mi petas, en la domon de
via frato Amnon, kaj pretigu al li manĝaĵon. 8 Kaj
Tamar iris en la domon de sia frato Amnon; li kuŝis.
Kaj ŝi prenis paston, knedis ĝin, preparis antaŭ liaj
okuloj, kaj bakis la kuketojn. 9 Kaj ŝi prenis la paton,
kaj elskuis antaŭ li; sed li ne volis manĝi. Kaj Amnon
diris: Forigu de mi ĉiujn. Kaj ĉiuj eliris de li. 10 Tiam
Amnon diris al Tamar: Alportu la manĝaĵon en la
internan ĉambron, por ke mi manĝu el viaj manoj.
Tamar prenis la kuketojn, kiujn ŝi faris, kaj alportis
ilin al sia frato Amnon en la internan ĉambron. 11
Sed, kiam ŝi ilin alportis al li por manĝi, li kaptis ŝin,

kaj diris al ŝi: Venu, kuŝiĝu kun mi, mia fratino. 12
Tiam ŝi diris al li: Ne, mia frato, ne perfortu min; ĉar
tiel ne estas farate en Izrael; ne faru tian malnoblaĵon.
13 Kien mi irus kun mia malhonoro? kaj vi fariĝus kiel
iu el la malnobluloj en Izrael. Parolu kun la reĝo, mi
petas; kaj li ne rifuzos min al vi. 14 Sed li ne volis
obei ŝiajn vortojn, kaj kaptis ŝin kaj perfortis ŝin kaj
kuŝis kun ŝi. 15 Post tio Amnon ekmalamis ŝin per tre
granda malamo; pli granda estis la malamo, kiun li
eksentis al ŝi, ol la amo, kiun li antaŭe havis por ŝi. Kaj
Amnon diris al ŝi: Leviĝu, foriru. 16 Kaj ŝi diris al li: Se
vi forpelas min, tiam ĉi tiu granda malbono estas pli
granda, ol la alia, kiun vi faris al mi. Sed li ne volis
aŭskulti ŝin. 17 Kaj li alvokis sian junulon-servanton,
kaj diris: Forpelu de mi ĉi tiun for, kaj ŝlosu la pordon
post ŝi. 18 Ŝi havis sur si diverskoloran veston, ĉar per
tiaj tunikoj vestadis sin la filinoj de la reĝo. Kaj lia
servanto elkondukis ŝin eksteren kaj ŝlosis la pordon
post ŝi. 19 Tiam Tamar prenis cindron sur sian kapon,
kaj la diverskoloran veston, kiu estis sur ŝi, ŝi disŝiris;
kaj ŝi metis sian manon sur sian kapon, kaj iris kaj
kriis. 20 Kaj diris al ŝi ŝia frato Abŝalom: Ĉu via frato
Amnon estis kun vi? nun, mia fratino, silentu; li estas
via frato; ne tro afliktiĝu pro tiu afero. Kaj Tamar
restis malĝoja en la domo de sia frato Abŝalom. 21
Kiam la reĝo David aŭdis ĉion ĉi tion, li tre koleris.
22 Abŝalom parolis kun Amnon nek malbonon nek
bonon; ĉar Abŝalom malamis Amnonon pro tio, ke li
perfortis lian fratinon Tamar. 23 Okazis post du jaroj,
ke oni tondis la ŝafojn ĉe Abŝalom en Baal-Ĥacor, kiu
estas apud Efraim; kaj Abŝalom invitis ĉiujn filojn de
la reĝo. 24 Kaj Abŝalom venis al la reĝo, kaj diris: Jen
oni tondas ĉe via sklavo; mi petas, ke la reĝo kun siaj
servantoj venu al via sklavo. 25 Sed la reĝo diris al
Abŝalom: Ne, mia filo, ni ne iros ĉiuj, por ke ni ne estu
ŝarĝo por vi. Tiu insiste lin petis; sed li ne volis iri,
li nur benis lin. 26 Tiam Abŝalom diris: Se ne, tiam
almenaŭ mia frato Amnon iru kun ni. Kaj la reĝo diris
al li: Por kio li iru kun vi? 27 Sed Abŝalom insiste lin
petis; tial li lasis iri kun li Amnonon kaj ĉiujn filojn de
la reĝo. 28 Kaj Abŝalom ordonis al siaj servantoj jene:
Rigardu, mi petas, kiam la koro de Amnon gajiĝos
de vino, kaj mi diros al vi, ke vi frapu Amnonon,
tiam mortigu lin, ne timu; ĉar ja mi ordonis al vi;
estu senhezitaj kaj kuraĝaj. 29 Kaj la servantoj de
Abŝalom faris al Amnon, kiel ordonis Abŝalom. Tiam
leviĝis ĉiuj filoj de la reĝo, kaj sidiĝis ĉiu sur sia mulo
kaj forkuris. 30 Kiam ili estis ankoraŭ sur la vojo, al
David venis la famo, ke Abŝalom mortigis ĉiujn filojn
de la reĝo kaj neniu el ili restis. 31 La reĝo leviĝis,
kaj disŝiris siajn vestojn, kaj kuŝiĝis sur la tero; kaj
ĉiuj liaj servantoj staris kun disŝiritaj vestoj. 32 Tiam
ekparolis Jonadab, filo de Ŝimea, frato de David, kaj
diris: Mia sinjoro ne diru, ke ĉiuj junuloj filoj de la
reĝo estas mortigitaj; ĉar nur Amnon sola mortis; ĉar
ĉe Abŝalom tio estis decidita de post la tago, kiam tiu
perfortis lian fratinon Tamar. 33 Kaj nun mia sinjoro
la reĝo ne atentu la famon, kiu diras, ke ĉiuj filoj
de la reĝo mortis; nur Amnon sola mortis. 34 Dume
Abŝalom forkuris. La gardostaranta servanto levis
siajn okulojn, kaj ekvidis, ke multe da homoj iras de
la vojo malantaŭa laŭ la deklivo de la monto. 35 Kaj
Jonadab diris al la reĝo: Jen la filoj de la reĝo venas;
kiel via sklavo diris, tiel fariĝis. 36 Kiam li finis paroli,
venis la filoj de la reĝo, kaj ili levis sian voĉon kaj
ploris; kaj ankaŭ la reĝo kaj ĉiuj liaj servantoj ploris
per tre granda ploro. 37 Sed Abŝalom forkuris, kaj
venis al Talmaj, filo de Amihud, reĝo de Geŝur. Kaj
David funebris pro sia filo dum la tuta tempo. 38
Abŝalom forkuris, kaj iris Geŝuron, kaj restis tie dum
tri jaroj. 39 Kaj la reĝo David forte sopiris al Abŝalom;
ĉar li konsoliĝis pri la morto de Amnon.

**14** Joab, filo de Ceruja, rimarkis, ke la koro de la
reĝo plifavoriĝis por Abŝalom. 2 Kaj Joab sendis
en Tekoan kaj venigis de tie saĝan virinon, kaj diris al
ŝi: Ŝajnigu vin funebranta kaj metu sur vin funebrajn
vestojn, kaj ne ŝmiru vin per oleo, kaj estu kiel virino,
kiu jam de longe funebras pro mortinto; 3 kaj venu
al la reĝo, kaj diru al li jenon; kaj Joab inspiris al ŝi,
kion ŝi devas diri. 4 Kaj la virino el Tekoa ekparolis
al la reĝo, kaj ĵetis sin vizaĝaltere kaj adorkliniĝis,
kaj diris: Helpu min, ho reĝo! 5 Kaj la reĝo diris al
ŝi: Kio estas al vi? Kaj ŝi respondis: Ho ve, mi estas
vidvino, mia edzo mortis. 6 Sed via sklavino havis
du filojn; ili ambaŭ ekkverelis sur la kampo, kaj ĉar
estis inter ili neniu savanto, unu frapis la alian kaj
mortigis lin. 7 Kaj jen leviĝis kontraŭ vian sklavinon
la tuta familio, dirante: Eldonu la fratmortiginton,
por ke ni mortigu lin pro la animo de lia frato, kiun li
mortigis, kaj ni ekstermu ankaŭ la heredanton. Tiel
ili volas estingi mian karbon, kiu ankoraŭ restis, por
ne restigi al mia edzo nomon nek ian restaĵon sur la
tero. 8 Tiam la reĝo diris al la virino: Iru hejmen, kaj

mi donos ordonon pri vi. 9 Sed la virino el Tekoa diris
al la reĝo: Sur mi, mia sinjoro, ho reĝo, estu la krimo,
kaj sur la domo de mia patro; sed la reĝo kaj lia trono
estas senkulpaj. 10 Kaj la reĝo diris: Alkonduku al mi
tiun, kiu parolas kontraŭ vi, kaj li ne plu tuŝos vin. 11
Kaj ŝi diris: La reĝo volu memori pri la Eternulo, lia
Dio, por ke la sangovenĝantoj ne faru pli da pereo
kaj ne ekstermu mian filon. Li diris: Mi ĵuras per la
Eternulo, ke ne falos eĉ haro de via filo sur la teron.
12 Kaj la virino diris: Permesu, ke via sklavino diru
vorton al mia sinjoro la reĝo. Li diris: Parolu. 13 Kaj la
virino diris: Kial do vi tiel pensas pri la popolo de Dio?
eldirante tian vorton, la reĝo fariĝas kvazaŭ kulpulo,
ke li ne revenigas sian elpeliton. 14 Ĉar ni devas morti,
kaj ni similas al akvo, kiu estas verŝata sur la teron kaj
kiun oni ne povas enkolekti; sed Dio ne volas pereigi
animon; Li pripensas, ke forpuŝito ne estu forpuŝata
ankaŭ de Li. 15 Nur nun mi venis, por diri tion al la
reĝo, mia sinjoro, ĉar la popolo min timigis; sed via
sklavino diris al si: Mi provos paroli al la reĝo; eble la
reĝo plenumos la vorton de sia sklavino; 16 eble la
reĝo aŭskultos, por savi sian sklavinon el la mano de
tiu homo, kiu volas ekstermi min kaj mian filon kune
el la heredaĵo de Dio. 17 Kaj via sklavino diris al si: La
vorto de mia sinjoro la reĝo donos trankvilecon; ĉar
kiel anĝelo de Dio, tiel estas mia sinjoro la reĝo, por
distingi la bonon kaj malbonon; kaj la Eternulo, via
Dio, estos kun vi. 18 Tiam ekparolis la reĝo, kaj diris al
la virino: Mi petas, kaŝu antaŭ mi nenion, pri kio mi
demandos vin. Kaj la virino diris: Mia sinjoro la reĝo
volu paroli. 19 Kaj la reĝo diris: Ĉu ne la mano de Joab
estas kun vi en ĉio ĉi tio? Kaj la virino respondis kaj
diris: Vere, kiel vivas via animo, mia sinjoro, ho reĝo,
ne estas eble dekliniĝi dekstren nek maldekstren de
ĉio, kion diris mia sinjoro la reĝo; ĉar via sklavo Joab
tion ordonis al mi, kaj li inspiris al via sklavino ĉiujn
ĉi tiujn vortojn. 20 Por aliformigi la aspekton de la
afero, via sklavo Joab tion faris; sed mia sinjoro estas
saĝa per saĝeco de anĝelo de Dio, kaj scias ĉion, kio
estas sur la tero. 21 Tiam la reĝo diris al Joab: Jen mi
tion faris; iru do kaj revenigu la junulon Abŝalom. 22
Joab ĵetis sin vizaĝaltere kaj adorkliniĝis, kaj dankis
la reĝon. Kaj Joab diris: Hodiaŭ via sklavo scias, ke
mi akiris vian favoron, mia sinjoro, ho reĝo, ĉar la
reĝo plenumis la vorton de sia sklavo. 23 Kaj Joab
leviĝis, kaj iris en Geŝuron, kaj venigis Abŝalomon
en Jerusalemon. 24 Sed la reĝo diris: Li reiru en sian
domon, sed mian vizaĝon li ne vidu. Kaj Abŝalom
revenis en sian domon, sed la vizaĝon de la reĝo li
ne vidis. 25 En la tuta Izrael estis neniu homo tiel
famege bela, kiel Abŝalom: de la plando de lia piedo
ĝis lia verto estis en li nenia mallaŭdindaĵo. 26 Kaj
kiam li tondis sian kapon (li tondadis ĉiujare, ĉar la
haroj fariĝadis por li tro pezaj, kaj estis necese tondi),
la haroj de lia kapo pezis ducent siklojn laŭ la reĝa
pesilo. 27 Al Abŝalom naskiĝis tri filoj, kaj unu filino,
kies nomo estis Tamar; ŝi estis virino belaspekta. 28
Abŝalom restis en Jerusalem du jarojn, kaj la vizaĝon
de la reĝo li ne vidis. 29 Kaj Abŝalom sendis al Joab, por
sendi lin al la reĝo; sed tiu ne volis veni al li. Li sendis
ankoraŭ duan fojon, sed tiu ne volis veni. 30 Tiam
li diris al siaj servantoj: Rigardu la kampoparton de
Joab apud mia; li havas tie hordeon; iru, kaj forbruligu
ĝin per fajro. Kaj la servantoj de Abŝalom forbruligis
la kampoparton per fajro. 31 Tiam Joab leviĝis, kaj
venis al Abŝalom en la domon, kaj diris al li: Kial viaj
servantoj forbruligis per fajro mian kampoparton? 32
Abŝalom respondis al Joab: Jen mi sendis al vi, por
diri al vi: Venu ĉi tien, por ke mi sendu vin al la
reĝo, por demandi, kial mi venis el Geŝur; pli bone
estus por mi resti tie. Nun mi volas vidi la vizaĝon
de la reĝo; kaj se mi havas en mi krimon, li mortigu
min. 33 Kaj Joab iris al la reĝo, kaj diris al li tion;
kaj ĉi tiu alvokis Abŝalomon, kiu venis al la reĝo, kaj
adorkliniĝis vizaĝaltere antaŭ la reĝo; kaj la reĝo kisis
Abŝalomon.

15 Post tio Abŝalom havigis al si ĉaron kaj ĉevalojn
kaj kvindek virojn, kiuj kuradis antaŭ li. 2 Kaj
Abŝalom leviĝadis frue, kaj stariĝadis ĉe la vojo al la
pordego; kaj ĉiun homon, kiu havis plendon kaj iris al
la reĝo por juĝo, Abŝalom vokis al si, kaj diris al li: El
kiu urbo vi estas? Kaj kiam tiu respondis: Via sklavo
estas el tiu aŭ tiu tribo de Izrael, 3 Abŝalom diris al li:
Via afero estas bona kaj justa, sed ne ekzistas por vi
aŭskultanto ĉe la reĝo. 4 Kaj plue Abŝalom parolis: Ho,
kiu farus min juĝisto en la lando, por ke al mi venu
ĉiu homo, kiu havas plendon aŭ juĝan aferon, kaj por
ke mi faru al li juston! 5 Kaj kiam iu alproksimiĝis, por
adorkliniĝi antaŭ li, li etendis sian manon, kaptis lin,
kaj kisis lin. 6 Tiel Abŝalom agis kun ĉiuj Izraelidoj,
kiuj iris por juĝo al la reĝo; kaj Abŝalom ŝtele allogis
al si la korojn de la Izraelidoj. 7 Atinginte la aĝon de
kvardek jaroj, Abŝalom diris al la reĝo: Permesu al mi

iri kaj plenumi en Ĥebron mian sanktan promeson,
kiun mi faris al la Eternulo; 8 ĉar sanktan promeson
faris via sklavo, kiam mi estis en Geŝur en Sirio, nome:
Se la Eternulo revenigos min en Jerusalemon, mi
faros oferon al la Eternulo. 9 Kaj la reĝo diris al li:
Iru en paco. Kaj li leviĝis, kaj iris Ĥebronon. 10 Kaj
Abŝalom sendis esplorrigardantojn al ĉiuj triboj de
Izrael kun la sekvanta instrukcio: Kiam vi aŭdos la
sonon de trumpeto, tiam diru: Abŝalom fariĝis reĝo
en Ĥebron. 11 Kune kun Abŝalom iris ducent viroj
el Jerusalem; ili estis invititaj, kaj iris sen ia kulpa
intenco, nenion sciante. 12 Kaj Abŝalom sendis inviti
ankaŭ Aĥitofelon, la Giloanon, la konsiliston de David,
el lia urbo Gilo, kiam li estis faranta la buĉoferojn.
Tiam la konspiro plifortiĝis, kaj la popolo ĉiam pli kaj
pli amase iris al Abŝalom. 13 Dume venis raportanto
al David, kaj diris: La koroj de la Izraelidoj turniĝis al
Abŝalom. 14 Tiam David diris al ĉiuj siaj servantoj,
kiuj estis kun li en Jerusalem: Leviĝu, kaj ni forkuru,
ĉar alie ni ne povos saviĝi kontraŭ Abŝalom; rapidu
foriri, por ke li, rapidinte, ne atingu nin, ne venigu
sur nin malfeliĉon, kaj ne pereigu la urbon per glavo.
15 Kaj la servantoj de la reĝo diris al la reĝo: Kion ajn
elektos nia sinjoro la reĝo, ni estas viaj sklavoj. 16
Tiam la reĝo kaj lia tuta domo eliris piede, kaj la reĝo
restigis la dek kromvirinojn, por gardi la domon. 17
Kaj la reĝo, kun la tuta popolo, kiu sekvis lin, eliris;
kaj ili haltis ĉe malproksima domo. 18 Kaj ĉiuj liaj
servantoj preteriris preter li, kaj ĉiuj Keretidoj kaj
Peletidoj, kaj ĉiuj Gatanoj, sescent viroj, kiuj sekvis lin
el Gat, preteriris antaŭ la reĝo. 19 Kaj la reĝo diris al
Itaj, la Gatano: Kial vi ankaŭ iras kun ni? iru returne
kaj restu kun la reĝo, ĉar vi estas fremdulo kaj vi
estas elŝirita el via loko. 20 Hieraŭ vi venis; kaj ĉu mi
povas hodiaŭ altrudi al vi la iradon kun ni? mi iras,
kien mi povas iri. Iru returne, kaj rekonduku viajn
fratojn kun vi; favorkoreco kaj justeco estu al vi. 21
Sed Itaj respondis al la reĝo kaj diris: Mi ĵuras per
la Eternulo kaj per mia sinjoro la reĝo: nur en tiu
loko, en kiu estos mia sinjoro la reĝo, ĉu por vivo, ĉu
por morto, nur tie estos via sklavo. 22 Tiam David
diris al Itaj: Venu, kaj preteriru. Kaj preteriris Itaj,
la Gatano, kaj ĉiuj liaj viroj, kune kun ĉiuj infanoj,
kiuj estis kun li. 23 Kaj ĉiuj ploris per laŭta voĉo,
kaj la tuta popolo preteriris. Kaj la reĝo transiris la
torenton Kidron, kaj la tuta popolo iris antaŭen laŭ la
vojo al la dezerto. 24 Aperis ankaŭ Cadok, kune kun
ĉiuj Levidoj, kiuj portis la keston de interligo de Dio;
kaj ili starigis la keston de Dio; kaj Ebjatar staris pli
alte, ĝis preteriris la tuta popolo el la urbo. 25 Kaj la
reĝo diris al Cadok: Revenigu la keston de Dio en la
urbon. Se mi akiros favoron de la Eternulo, tiam Li
revenigos min kaj vidigos al mi ĝin kaj Sian loĝejon;
26 sed se Li diros: Vi ne plaĉas al Mi, tiam mi estas
preta; Li faru kun mi, kiel plaĉas al Li. 27 Kaj la reĝo
diris al la pastro Cadok: Vi estas antaŭvidema; reiru
en paco en la urbon, kaj via filo Aĥimaac, kaj Jonatan,
filo de Ebjatar, ambaŭ viaj filoj, iru kun vi. 28 Vidu, mi
restos sur la ebenaĵoj de la dezerto, ĝis venos io de vi,
por sciigi al mi. 29 Tiam Cadok kaj Ebjatar reportis la
keston de Dio en Jerusalemon, kaj ili tie restis. 30 Kaj
David supreniris sur la monton de olivoj, irante kaj
plorante; lia kapo estis kovrita, kaj li iris nudpieda;
kaj la tuta popolo, kiu estis kun li, kovris ĉiu sian
kapon kaj iris supren, senĉese plorante. 31 Kiam oni
diris al David, ke Aĥitofel estas inter la konspirantoj
kun Abŝalom, David diris: Mi petas Vin, ho Eternulo,
malsaĝigu la konsilon de Aĥitofel. 32 David venis sur
la supron, kie oni adorkliniĝas al Dio; kaj jen renkonte
al li iras Ĥuŝaj, la Arkano; lia vesto estas disŝirita, kaj
tero estas sur lia kapo. 33 Kaj David diris al li: Se vi
iros kun mi, vi estos por mi ŝarĝo; 34 sed se vi reiros
en la urbon, kaj diros al Abŝalom: Mi estos via sklavo,
ho reĝo; kiel mi estis la sklavo de via patro delonge,
tiel mi de nun estos via sklavo — tiam vi detruos
por mi la konsilon de Aĥitofel. 35 Tie estos kun vi la
pastroj Cadok kaj Ebjatar; kaj ĉion, kion vi aŭdos en la
domo de la reĝo, diru al la pastroj Cadok kaj Ebjatar.
36 Jen tie estas kun ili iliaj du filoj, Aĥimaac ĉe Cadok,
kaj Jonatan ĉe Ebjatar; per ili vi transsendos al mi
ĉion, kion vi aŭdos. 37 Kaj Ĥuŝaj, amiko de David,
venis en la urbon. Ankaŭ Abŝalom venis Jerusalemon.

**16** Kiam David iom malsupreniris de la supro,
jen venis al li renkonte Ciba, la servanto de
Mefiboŝet, kun paro da selitaj azenoj, sur kiuj estis
ducent panoj kaj cent sekvinberaj kukoj kaj cent
sekigitaj fruktoj kaj felsako kun vino. 2 Kaj la reĝo diris
al Ciba: Por kio tio estas kun vi? Kaj Ciba respondis:
La azenoj estas por la domo de la reĝo, por rajdi
sur ili, kaj la pano kaj la fruktoj por la servantoj
por manĝi, kaj la vino por trinki por la laciĝintoj
en la dezerto. 3 Kaj la reĝo diris: Kie estas la filo
de via sinjoro? Ciba respondis al la reĝo: Li sidas en

Jerusalem, ĉar li diras: Nun la domo de Izrael redonos
al mi la regnon de mia patro. 4 Tiam la reĝo diris al
Ciba: Nun al vi apartenu ĉio, kion havas Mefiboŝet.
Kaj Ciba diris: Mi adorkliniĝas; mi akiru vian favoron,
mia sinjoro, ho reĝo. 5 Kiam la reĝo David venis ĝis
Baĥurim, jen el tie eliras viro el la familio de la domo
de Saul; lia nomo estis Ŝimei, filo de Gera; elirante, li
senĉese insultadis. 6 Li ĵetis ŝtonojn sur Davidon kaj
sur ĉiujn servantojn de la reĝo David; la tuta popolo
kaj ĉiuj fortuloj estis dekstre kaj maldekstre de li. 7
Kaj tiel parolis Ŝimei, insultante: For, for, sangavidulo,
malbonagulo! 8 la Eternulo revenigis sur vin la tutan
sangon de la domo de Saul, sur kies loko vi fariĝis
reĝo, kaj la Eternulo transdonis la regnon en la manon
de via filo Abŝalom; tion vi havas pro via malboneco,
ĉar vi estas sangavidulo. 9 Tiam Abiŝaj, filo de Ceruja,
diris al la reĝo: Kial insultu tiu senviva hundo mian
sinjoron, la reĝon? permesu al mi iri kaj dehaki lian
kapon. 10 Sed la reĝo diris: Kiel tio koncernas min kaj
vin, filoj de Ceruja? li insultu; ĉar la Eternulo diris al
li: Insultu Davidon. Kiu povas diri: Kial vi tion faras?
11 Kaj David diris al Abiŝaj kaj al ĉiuj siaj servantoj:
Jen mia filo, kiu eliris el mia interno, atencas mian
animon; tiom pli tion povas fari nun la Benjamenido;
lasu lin, kaj li insultu, ĉar la Eternulo tion ordonis al li.
12 Eble la Eternulo vidos mian mizeron, kaj la Eternulo
repagos al mi bonon anstataŭ lia hodiaŭa insultado.
13 Kaj David kun siaj homoj daŭrigis sian vojon. Kaj
Ŝimei iris laŭ la deklivo de la monto, kontraŭ li, iris
kaj insultis, ĵetadis ŝtonojn sur lin, kaj ŝutadis sur lin
teron. 14 La reĝo kaj la tuta popolo, kiu estis kun li,
venis lacaj kaj ripozis tie. 15 Dume Abŝalom kaj ĉiuj
Izraelidoj venis en Jerusalemon, kaj Aĥitofel kun li.
16 Kiam Ĥuŝaj, la Arkano, amiko de David, venis al
Abŝalom, li diris al Abŝalom: Vivu la reĝo! vivu la reĝo!
17 Kaj Abŝalom diris al Ĥuŝaj: Tia estas via amo al via
amiko! kial vi ne iris kun via amiko? 18 Sed Ĥuŝaj
respondis al Abŝalom: Ne, sed kiun elektis la Eternulo
kaj ĉi tiu popolo kaj ĉiuj Izraelidoj, al tiu mi apartenos,
kaj kun li mi restos. 19 Due, kiun mi servos? ĉu ne lian
filon? kiel mi servis vian patron, tiel mi estos al vi.
20 Tiam Abŝalom diris al Aĥitofel: Konsiliĝu inter vi,
kion ni devas fari. 21 Kaj Aĥitofel diris al Abŝalom:
Eniru al la kromvirinoj de via patro, kiujn li restigis,
por gardi la domon. Kiam ĉiuj Izraelidoj aŭdos, ke vi
abomenigis al vi vian patron, tiam fortiĝos la manoj
de ĉiuj, kiuj estas kun vi. 22 Tiam oni starigis por
Abŝalom tendon sur la tegmento, kaj Abŝalom eniris
al la kromvirinoj de sia patro antaŭ la okuloj de ĉiuj
Izraelidoj. 23 La konsiloj de Aĥitofel, kiujn li donadis
en tiu tempo, havis tian valoron, kiel se oni demandus
la decidon de Dio; tiaj estis ĉiuj konsiloj de Aĥitofel,
kiel por David, tiel ankaŭ por Abŝalom.

17 Kaj Aĥitofel diris al Abŝalom: Permesu al mi
elekti dek du mil virojn, kaj mi leviĝos kaj
postkuros Davidon en la nokto. 2 Mi atakos lin, kiam
li estos laca kaj liaj manoj estos malfortaj; mi teruros
lin tiel, ke forkuros la tuta popolo, kiu estas kun li;
tiam mi mortigos la reĝon solan. 3 Kaj mi revenigos la
tutan popolon al vi; kiam revenos ĉiuj, krom tiu, kiun
vi serĉas, tiam al la tuta popolo fariĝos paco. 4 Kaj la
afero plaĉis al Abŝalom kaj al ĉiuj plejaĝuloj de Izrael.
5 Tamen Abŝalom diris: Alvoku ankoraŭ Ĥuŝajon, la
Arkanon, por ke ni aŭdu ankaŭ tion, kion li diros.
6 Kiam Ĥuŝaj venis al Abŝalom, Abŝalom diris al li:
Jen kion diris Aĥitofel; ĉu ni faru tion, kion li diris?
se ne, tiam diru vi. 7 Tiam Ĥuŝaj diris al Abŝalom:
Ne bona estas la konsilo, kiun donis Aĥitofel ĉi tiun
fojon. 8 Kaj Ĥuŝaj diris plue: Vi konas vian patron
kaj liajn virojn, ke ili estas fortuloj; krom tio ili estas
koleraj, kiel urso, de kiu oni forrabis la infanojn sur
la kampo; kaj via patro estas sperta militisto, kaj li
ne dormos nokte kun la popolo. 9 Jen nun li kaŝiĝas
en ia kaverno aŭ en ia alia loko. Se en la komenco
iu el la niaj falos, kaj disvastiĝos la famo, ke havis
malvenkon la popolo, kiu sekvas Abŝalomon, 10 tiam
eĉ la plej kuraĝa, kiu havas koron, similan al la koro
de leono, senkuraĝiĝos; ĉar la tuta Izrael scias, kiel
fortaj estas via patro, kaj la militistoj, kiuj estas kun
li. 11 Tial mi konsilas: kolektu al vi la tutan Izraelon,
de Dan ĝis Beer-Ŝeba, tian multegon, kiel la sablo
apud la maro, kaj vi persone iru meze de ili. 12 Kaj ni
atakos lin, en kiu ajn loko li troviĝos, kaj ni surfalos
sur lin, kiel falas la roso sur la teron; kaj el li, kun
ĉiuj viroj, kiuj estas kun li, ne restos eĉ unu. 13 Kaj se
li enfermiĝos en urbo, tiam la tuta Izrael ĉirkaŭigos
tiun urbon per ŝnuroj, kaj trenos ĝin en la riveron, ĝis
ne restos tie eĉ ŝtoneto. 14 Tiam diris Abŝalom kaj
ĉiuj Izraelidoj: La konsilo de Ĥuŝaj, la Arkano, estas
pli bona, ol la konsilo de Aĥitofel. Sed la Eternulo
decidis detrui la bonan konsilon de Aĥitofel, por ke la
Eternulo venigu malfeliĉon sur Abŝalomon. 15 Kaj
Ĥuŝaj diris al la pastroj Cadok kaj Ebjatar: Tiel kaj

tiel konsilis Aĥitofel al Abŝalom kaj al la plejaĝuloj de
Izrael, kaj tiel kaj tiel konsilis mi; 16 nun sendu rapide,
kaj dirigu al David jenon: Ne pasigu ĉi tiun nokton sur
la ebenaĵo de la dezerto, sed transiru, por ke ne pereu
la reĝo, kaj la tuta popolo, kiu estas kun li. 17 Jonatan
kaj Aĥimaac staris apud En-Rogel; servantino iris kaj
sciigis al ili, por ke ili iru kaj sciigu al la reĝo David,
ĉar ili ne devis sin montri kaj veni en la urbon. 18 Sed
ilin ekvidis iu junulo, kaj raportis al Abŝalom; dume
ili ambaŭ rapide iris, kaj venis en Baĥurimon en la
domon de unu homo, sur kies korto troviĝis puto,
kaj ili malsupreniris tien. 19 Kaj lia edzino prenis kaj
sternis kovrotukon super la aperturo de la puto kaj
ŝutis sur ĝin grion, por ke oni nenion rimarku. 20
Kiam la servantoj de Abŝalom venis al la virino en la
domon, kaj demandis, kie estas Aĥimaac kaj Jonatan,
la virino respondis al ili: Ili iris trans la akvujon. Kaj
ili serĉis kaj ne trovis, kaj ili revenis Jerusalemon.
21 Kiam ili foriris, tiuj eliris el la puto, kaj iris kaj
raportis al la reĝo David, kaj diris al David: Leviĝu,
kaj transiru rapide la akvon, ĉar tiel kaj tiel konsilis
kontraŭ vi Aĥitofel. 22 Tiam leviĝis David, kaj la tuta
popolo, kiu estis kun li, kaj ili transiris Jordanon antaŭ
la mateniĝo; kaj restis neniu, kiu ne estus transirinta
Jordanon. 23 Kiam Aĥitofel vidis, ke oni ne plenumis
lian konsilon, li selis azenon, leviĝis kaj iris al sia
domo, en sian urbon, faris ordonojn pri sia domo, kaj
sufokis sin kaj mortis; kaj oni enterigis lin en la tombo
de lia patro. 24 Dume David venis en Maĥanaimon,
kaj Abŝalom transiris Jordanon, li kaj ĉiuj viroj de
Izrael kun li. 25 Kaj Amasan Abŝalom starigis super
la militistaro anstataŭ Joab; Amasa estis filo de viro,
kies nomo estis Jitra, el Jizreel, kaj kiu envenis al
Abigail, filino de Naĥaŝ, fratino de Ceruja, patrino de
Joab. 26 Kaj Izrael kaj Abŝalom stariĝis tendare en la
lando Gilead. 27 Kiam David venis en Maĥanaimon,
tiam Ŝobi, filo de Naĥaŝ, el Raba de la Amonidoj,
kaj Maĥir, filo de Amiel, el Lo-Debar, kaj Barzilaj, la
Gileadano, el Roglim, 28 alportis litojn kaj tapiŝojn kaj
argilajn vazojn, kaj tritikon kaj hordeon kaj farunon
kaj rostitajn grajnojn, kaj fabojn kaj lentojn, ankaŭ
rostitajn, 29 kaj mielon kaj buteron kaj ŝafojn kaj
fromaĝojn; ili alportis al David, kaj al la popolo, kiu
estis kun li, por manĝi; ĉar ili diris: La popolo estas
malsata kaj laca kaj soifa en la dezerto.

**18** David prikalkulis la popolon, kiu estis kun li, kaj
starigis super ĝi milestrojn kaj centestrojn. 2 Kaj
David metis trionon de la popolo sub la disponon de
Joab, kaj trionon sub la disponon de Abiŝaj, filo de
Ceruja kaj frato de Joab, kaj trionon sub la disponon
de Itaj, la Gatano. Kaj la reĝo diris al la popolo: Mi
ankaŭ iros kun vi. 3 Sed la popolo diris: Ne iru; ĉar
se ni eĉ forkuros, ili ne tre atentos nin; eĉ se duono
de ni mortos, ili ne tre atentos nin; sed vi estas kiel
dek mil el ni; tial estas pli bone, ke vi helpu nin el la
urbo. 4 Tiam la reĝo diris al ili: Kion vi deziras, tion
mi faros. Kaj la reĝo stariĝis apud la pordego, kaj la
tuta popolo eliris laŭ centoj kaj miloj. 5 Kaj la reĝo
ordonis al Joab kaj al Abiŝaj kaj al Itaj: Estu singardaj
kun la junulo Abŝalom. Kaj la tuta popolo aŭdis, kiel la
reĝo ordonis al ĉiuj estroj koncerne Abŝalomon. 6 Kaj
la popolo eliris sur la kampon kontraŭ Izraelon, kaj
fariĝis batalo en la arbaro de Efraim. 7 Kaj la popolo
Izraela estis tie venkobatita de la servantoj de David,
kaj tie estis granda venkobato en tiu tago: falis dudek
mil. 8 La batalo disvastiĝis tie sur la tutan regionon;
kaj la arbaro pereigis pli da homoj, ol ekstermis la
glavo en tiu tago. 9 Kaj Abŝalom renkontiĝis kun la
servantoj de David; Abŝalom rajdis sur mulo. Kaj la
mulo trafis sub interplektitajn branĉojn de granda
kverko, kaj lia kapo alkroĉiĝis al la kverko, kaj li
ekpendis inter la ĉielo kaj la tero; kaj la mulo, kiu
estis sub li, forkuris. 10 Tion ekvidis unu homo, kaj
sciigis al Joab, kaj diris: Jen mi vidis Abŝalomon, kiu
pendas de kverko. 11 Kaj Joab diris al la homo, kiu
raportis al li: Se vi vidis, kial do vi ne batis lin tie sur
la teron? mi donus al vi dek arĝentajn monerojn kaj
unu zonon. 12 Sed la homo diris al Joab: Se vi donus
en miajn manojn eĉ mil arĝentajn monerojn, mi ne
etendus mian manon kontraŭ la filo de la reĝo; ĉar
antaŭ niaj oreloj la reĝo ordonis al vi kaj al Abiŝaj kaj
al Itaj, dirante: Gardu al mi la junulon Abŝalom. 13 Kaj
se mi farus falsaĵon kontraŭ mia animo, nenio kaŝiĝus
antaŭ la reĝo, kaj vi starus flanke. 14 Joab diris: Mi ne
perdos tempon kun vi. Kaj li prenis en sian manon
tri lancojn, kaj enpikis ilin en la koron de Abŝalom,
kiam ĉi tiu ankoraŭ estis vivanta inter la branĉoj
de la kverko. 15 Poste dek junuloj armilportistoj de
Joab ĉirkaŭis Abŝalomon, batis, kaj mortigis lin. 16
Tiam Joab ekblovis per trumpeto, kaj la popolo ĉesis
postkuri la Izraelidojn; ĉar Joab haltigis la popolon. 17
Kaj oni prenis Abŝalomon kaj ĵetis lin en la arbaro

en grandan kavon, kaj oni metis super li tre grandan
amason da ŝtonoj; kaj ĉiuj Izraelidoj forkuris ĉiu al sia
tendo. 18 Sed Abŝalom ankoraŭ dum sia vivo starigis
al si monumenton, kiu troviĝas en la Valo de la Reĝo;
ĉar li diris: Mi ne havas filon, kiu memorigus pri mia
nomo; kaj li nomis la monumenton per sia nomo. Kaj
oni nomas ĝin ĝis nun monumento de Abŝalom. 19
Aĥimaac, filo de Cadok, diris: Mi kuros, kaj sciigos al
la reĝo, ke la Eternulo faris al li juston kontraŭ liaj
malamikoj. 20 Sed Joab diris al li: Ne bona sciiganto
vi estos hodiaŭ; vi sciigos en alia tago, kaj hodiaŭ
ne sciigu, ĉar mortis la filo de la reĝo. 21 Kaj Joab
diris al Etiopo: Iru, diru al la reĝo, kion vi vidis. La
Etiopo adorkliniĝis antaŭ Joab kaj ekkuris. 22 Tamen
Aĥimaac, filo de Cadok, parolis plue, kaj diris al Joab:
Kio ajn estos, permesu ankaŭ al mi kuri post la Etiopo.
Sed Joab diris: Por kio vi kuros, mia filo? venu, la sciigo
ne estos agrabla. 23 Kaj li diris: Kio ajn estos, mi kuros.
Kaj tiu diris al li: Kuru. Kaj Aĥimaac ekkuris laŭ la vojo
de la ebenaĵo, kaj kurantaŭiĝis antaŭ la Etiopon. 24
David sidis inter la du pordegoj; kaj la gardostaranto
iradis sur la tegmento de la pordego, super la muro,
kaj, levinte siajn okulojn, li ekvidis, ke jen iu viro sola
kuras. 25 Kaj la gardostaranto ekkriis, kaj raportis al la
reĝo. Kaj la reĝo diris: Se li estas sola, tiam bona sciigo
estas en lia buŝo. Kaj dum tiu ĉiam pli alproksimiĝadis,
26 la gardostaranto ekvidis, ke ankoraŭ alia viro kuras;
kaj la gardostaranto ekkriis al la pordegisto, kaj diris:
Jen ankoraŭ iu viro sola kuras. Kaj la reĝo diris: Ankaŭ
ĉi tiu havas bonan sciigon. 27 La gardostaranto diris:
Mi vidas la kuradon de la unua, ĝi estas kiel la kurado
de Aĥimaac, filo de Cadok. Kaj la reĝo diris: Li estas
bona homo, kun bona sciigo li venas. 28 Kaj Aĥimaac
ekkriis, kaj diris: Paco al la reĝo! Kaj li adorkliniĝis
antaŭ la reĝo vizaĝaltere, kaj diris: Benata estu la
Eternulo, via Dio, kiu transdonis la homojn, kiuj levis
sian manon kontraŭ mian sinjoron la reĝon. 29 Kaj la
reĝo diris: Ĉu bone fartas la junulo Abŝalom? Aĥimaac
respondis: Mi vidis grandan tumulton, kiam Joab
sendis la servanton de la reĝo kaj vian sklavon, kaj mi
ne scias, kio estis. 30 Tiam la reĝo diris: Deturniĝu, kaj
stariĝu tie. Kaj li deturniĝis, kaj stariĝis. 31 Kaj jen
venis la Etiopo, kaj la Etiopo diris: Bonan sciigon mi
alportas al mia sinjoro la reĝo; la Eternulo hodiaŭ
faris al vi juston kontraŭ ĉiuj, kiuj leviĝis kontraŭ vin.
32 Kaj la reĝo diris al la Etiopo: Ĉu bone fartas la junulo
Abŝalom? La Etiopo respondis: Kio fariĝis al la junulo,
tio fariĝu al la malamikoj de mia sinjoro la reĝo, kaj al
ĉiuj, kiuj malbonintence leviĝis kontraŭ vin. 33 Tiam
la reĝo malĝojiĝis, kaj li foriris en la superpordegan
ĉambreton, kaj ekploris. Kaj, irante, li parolis: Mia filo
Abŝalom, mia filo, mia filo Abŝalom! ho, se mi mortus
anstataŭ vi, Abŝalom, mia filo, mia filo!

19 Oni sciigis al Joab: Jen la reĝo ploras kaj malĝojas
pri Abŝalom. 2 Kaj la triumfo en tiu tago fariĝis
funebro por la tuta popolo; ĉar la popolo aŭdis en
tiu tago, ke la reĝo malĝojas pri sia filo. 3 Kaj la
popolo kvazaŭ ŝtelmaniere iris en tiu tago en la urbon,
kiel ŝtelmaniere iras homoj hontigitaj per tio, ke ili
forkuris el batalo. 4 Kaj la reĝo kovris sian vizaĝon,
kaj la reĝo kriadis laŭte: Mia filo Abŝalom, Abŝalom,
mia filo, mia filo! 5 Tiam Joab venis al la reĝo en la
domon, kaj diris: Vi malhonoris hodiaŭ la vizaĝon de
ĉiuj viaj servantoj, kiuj savis hodiaŭ vian animon kaj
la animon de viaj filoj kaj de viaj filinoj kaj la animon
de viaj edzinoj kaj la animon de viaj kromvirinoj;
6 ĉar vi amas viajn malamikojn, kaj malamas viajn
amantojn; ĉar vi montris hodiaŭ, ke ne ekzistas por
vi estroj nek sklavoj. Mi komprenas hodiaŭ, ke se
Abŝalom vivus kaj ni ĉiuj hodiaŭ mortus, tio plaĉus al
vi. 7 Leviĝu do, eliru kaj parolu ion al la koro de viaj
servantoj; ĉar mi ĵuras per la Eternulo, se vi ne eliros,
en ĉi tiu nokto ne restos eĉ unu homo ĉe vi; kaj tio
estos por vi pli malbona, ol ĉiuj malbonoj, kiuj trafis
vin de via juneco ĝis nun. 8 Tiam la reĝo leviĝis, kaj
sidiĝis ĉe la pordego. Kaj oni sciigis al la tuta popolo,
dirante: Jen la reĝo sidas ĉe la pordego. Kaj la tuta
popolo venis antaŭ la reĝon. Sed la Izraelidoj forkuris
ĉiu en sian tendon. 9 Kaj la tuta popolo disputadis
inter si en ĉiuj triboj de Izrael, dirante: La reĝo savis
nin el la manoj de niaj malamikoj, li savis nin el la
manoj de la Filiŝtoj; kaj nun li forkuris el sia lando
pro Abŝalom! 10 Kaj Abŝalom, kiun ni sanktoleis super
ni, mortis en la batalo. Kial do vi nun hezitas revenigi
la reĝon? 11 Dume la reĝo David sendis al la pastroj
Cadok kaj Ebjatar, por diri: Parolu kun la plejaĝuloj de
Jehuda, kaj diru: Kial vi volas esti la lastaj koncerne la
revenigon de la reĝo en lian domon, kiam la paroloj
de la tuta Izrael jam venis al la reĝo en lian domon?
12 Vi estas miaj fratoj, vi estas mia osto kaj mia karno;
kial do vi devas esti la lastaj ĉe la revenigo de la reĝo?
13 Kaj al Amasa diru: Vi estas ja mia osto kaj mia
karno; tiel kaj pli punu min Dio, se vi ne estos ĉe mi

por ĉiam militestro anstataŭ Joab. 14 Kaj li inklinigis
la koron de ĉiuj viroj de Jehuda kiel unu viron; kaj
ili sendis al la reĝo, kaj diris: Revenu vi kaj ĉiuj viaj
servantoj. 15 Kaj la reĝo revenis; li venis al Jordan; kaj
la viroj de Jehuda venis en Gilgalon, por iri renkonte
al la reĝo, por akompani la reĝon trans Jordanon. 16
Tiam Ŝimei, filo de Gera, la Benjamenido, el Baĥurim,
rapide iris kun la viroj de Jehuda renkonte al la reĝo
David. 17 Kun li estis mil viroj el Benjamen, ankaŭ
Ciba, servanto de la domo de Saul, kaj liaj dek kvin
filoj kaj liaj dudek servantoj kun li; kaj ili transiris
Jordanon antaŭ la reĝon. 18 La pramo transiradis, por
transveturigi la familion de la reĝo, kaj fari tion, kion
li deziros; tiam Ŝimei, filo de Gera, falis antaŭ la reĝo,
kiam ĉi tiu transiris Jordanon. 19 Kaj li diris al la reĝo:
Mia sinjoro ne kalkulu tion al mi kiel krimon, kaj ne
rememoru tion, kion malbonagis via sklavo en tiu
tago, kiam mia sinjoro la reĝo eliris el Jerusalem, kaj
la reĝo ne metu tion en sian koron. 20 Ĉar via sklavo
konscias, ke mi pekis; kaj nun mi venis la unua el la
tuta domo de Jozef, por iri renkonte al mia sinjoro
la reĝo. 21 Tiam ekparolis Abiŝaj, filo de Ceruja, kaj
diris: Ĉu efektive Ŝimei ne estos mortigita pro tio,
ke li insultis la sanktoleiton de la Eternulo? 22 Sed
David diris: Kiel tio koncernas min kaj vin, filoj de
Ceruja, ke vi hodiaŭ malhelpas min? ĉu hodiaŭ oni
povas iun mortigi en Izrael? ĉu mi ne scias, ke mi
nun estas reĝo super Izrael? 23 Kaj la reĝo diris al
Ŝimei: Vi ne mortos. Kaj la reĝo ĵuris al li. 24 Ankaŭ
Mefiboŝet, ido de Saul, iris renkonte al la reĝo. Li ne
ordigis siajn piedojn kaj ne ordigis sian barbon kaj ne
lavis siajn vestojn, de post la tago, kiam la reĝo foriris,
ĝis la tago, kiam li bonfarte revenis. 25 Kiam li venis
Jerusalemon renkonte al la reĝo, la reĝo diris al li:
Kial vi ne iris kun mi, Mefiboŝet? 26 Ĉi tiu respondis:
Mia sinjoro, ho reĝo! mia servanto min trompis; ĉar
via sklavo diris: Selu al mi azenon, por ke mi rajdu sur
ĝi kaj mi iru kun la reĝo; ĉar via sklavo estas lama. 27
Sed li kalumniis kontraŭ via sklavo al mia sinjoro la
reĝo; tamen vi, mia sinjoro, ho reĝo, estas kiel anĝelo
de Dio; agu, kiel plaĉas al vi. 28 Ĉar la tuta domo de
mia patro meritis morton antaŭ mia sinjoro la reĝo; vi
tamen metis vian sklavon inter tiujn, kiuj manĝas ĉe
via tablo. Kian justecon mi do ankoraŭ bezonas? kaj
kion mi havas por plendi al la reĝo? 29 Kaj la reĝo diris
al li: Kial vi parolas ankoraŭ pri viaj aferoj? mi jam
diris, ke vi kaj Ciba dividu inter vi la kampojn. 30 Sed
Mefiboŝet diris al la reĝo: Li prenu eĉ ĉion, post kiam
mia sinjoro la reĝo venis bonfarte en sian domon.
31 Ankaŭ Barzilaj, la Gileadano, venis el Roglim, kaj
akompanis la reĝon trans Jordanon, por konduki lin
transe de Jordan. 32 Barzilaj estis tre maljuna; li havis
la aĝon de okdek jaroj. Li donadis manĝaĵon al la reĝo,
kiam ĉi tiu estis en Maĥanaim, ĉar li estis homo tre
bonstata. 33 Kaj la reĝo diris al Barzilaj: Iru kun mi, kaj
mi zorgados pri vi ĉe mi en Jerusalem. 34 Sed Barzilaj
diris al la reĝo: Kiel longe mi havas ankoraŭ por vivi,
ke mi iru kun la reĝo Jerusalemon? 35 Mi havas nun
la aĝon de okdek jaroj; ĉu mi povas distingi inter
bono kaj malbono? ĉu via sklavo sentos la guston
de tio, kion mi manĝos aŭ kion mi trinkos? ĉu mi
povas ankoraŭ kompreni la voĉon de kantistoj kaj
kantistinoj? por kio via sklavo estu ŝarĝo por mia
sinjoro la reĝo? 36 Iomete iros via sklavo kun la reĝo
trans Jordanon; por kio la reĝo volas rekompenci min
per tia rekompenco? 37 Permesu al via sklavo, ke mi
reiru, kaj ke mi mortu en mia urbo, ĉe la tombo de
mia patro kaj mia patrino. Sed jen via sklavo Kimham
iru kun mia sinjoro la reĝo; kaj faru por li tion, kio
plaĉos al vi. 38 Kaj la reĝo diris: Kimham iru kun mi,
kaj mi faros por li tion, kio estos agrabla al vi; kaj
ĉion, kion vi deziros de mi, mi faros por vi. 39 La tuta
popolo transiris Jordanon, kaj ankaŭ la reĝo transiris.
Kaj la reĝo kisis Barzilajon kaj benis lin, kaj ĉi tiu
reiris al sia loko. 40 La reĝo transiris en Gilgalon, kaj
Kimham iris kun li; kaj la tuta popolo Juda akompanis
la reĝon, kaj ankaŭ duono de la popolo Izraela. 41 Sed
jen ĉiuj Izraelidoj venis al la reĝo, kaj diris al la reĝo:
Kial ŝtelis vin niaj fratoj la Judoj, kaj transkondukis
trans Jordanon la reĝon kaj lian familion kaj ĉiujn
liajn virojn kun li? 42 Tiam ĉiuj Judoj respondis al la
Izraelidoj: Ĉar la reĝo estas nia parenco; kaj kial tio
ĉagrenas vin? ĉu ni ion manĝis de la reĝo, aŭ ĉu li
donis al ni donacojn? 43 Kaj la Izraelidoj respondis al
la Judoj kaj diris: Dek partojn ni havas en la reĝo; kaj
eĉ en David ni havas pli grandan parton ol vi; kial
do vi malŝatis nin? ĉu ne ni la unuaj ekparolis pri
revenigo de nia reĝo? Sed la vortoj de la Judoj estis
pli obstinaj, ol la vortoj de la Izraelidoj.

**20** Troviĝis tie viro malbonaga, kies nomo estis
Ŝeba, filo de Biĥri, Benjamenido; li ekblovis per
trumpeto, kaj diris: Ni ne havas parton en David, ni
ne havas heredaĵon en la filo de Jiŝaj: iru, Izraelidoj,

ĉiu en sian tendon. 2 Kaj ĉiuj Izraelidoj foriris de
David, kaj sekvis Ŝeban, filon de Biĥri; sed la Judoj
restis fidelaj al sia reĝo, de Jordan ĝis Jerusalem. 3
Kiam David venis en sian domon en Jerusalem, la reĝo
prenis la dek kromvirinojn, kiujn li restigis, por gardi
la domon, kaj metis ilin en gardejon; li donadis al ili
vivrimedojn, sed li ne envenadis al ili. Kaj ili restis
ŝlositaj ĝis la tago de sia morto, vivante kiel vidvinoj.
4 Kaj la reĝo diris al Amasa: Kunvoku al mi la Judojn
por la tria tago, kaj vi ankaŭ venu ĉi tien. 5 Amasa iris,
por kunvoki la Judojn; sed li malfruis la templimon,
kiu estis destinita al li. 6 Tiam David diris al Abiŝaj:
Nun Ŝeba, filo de Biĥri, faros al ni pli da malbono, ol
Abŝalom; prenu do vi la servantojn de via sinjoro, kaj
postkuru lin, por ke li ne trovu fortikigitajn urbojn
kaj ne ŝirmu sin kontraŭ niaj okuloj. 7 Kaj eliris post li
la viroj de Joab kaj la Keretidoj kaj la Peletidoj kaj ĉiuj
fortuloj; kaj ili eliris el Jerusalem, por postkuri Ŝeban,
filon de Biĥri. 8 Kiam ili estis ĉe la granda ŝtono, kiu
troviĝas en Gibeon, Amasa venis antaŭ ilin. Joab havis
sur si striktan veston, kaj sur ĝi estis zonita glavo, kiu
pendis en la glavingo ĉe lia lumbo kaj facile povis eliri
kaj eniri. 9 Kaj Joab diris al Amasa: Kiel vi fartas, mia
frato? Kaj per la dekstra mano Joab prenis la barbon
de Amasa, por kisi lin. 10 Amasa ne atentis la glavon,
kiu estis en la mano de Joab; kaj ĉi tiu frapis lin per ĝi
en la ventron tiel, ke liaj internaĵoj elŝutiĝis sur la
teron, kaj sen ripetita frapo li mortis. Poste Joab kaj
lia frato Abiŝaj postkuris Ŝeban, filon de Biĥri. 11 Ĉe la
mortigito staris viro el la servantoj de Joab, kaj diris:
Kiu amas Joabon kaj kiu estas por David, tiu sekvu
Joabon. 12 Amasa kuŝis rulita en sango meze de la
vojo. Kiam tiu viro vidis, ke ĉiuj haltadis, li fortrenis
Amasan de la vojo sur la kampon kaj ĵetis sur lin
veston, ĉar li vidis, ke ĉiu, kiu venis al li, haltis. 13
Kiam li estis forigita for de la vojo, ĉiuj iris post Joab,
por postkuri Ŝeban, filon de Biĥri. 14 Ĉi tiu trairis
ĉiujn tribojn de Izrael, ĝis Abel kaj Bet-Maaĥa, kaj ĉiuj
Beriidoj; kaj oni kolektiĝis, kaj sekvis lin. 15 Kaj ili
venis, kaj eksieĝis lin en Abel-Bet-Maaĥa, kaj ŝutis
ĉirkaŭ la urbo remparon, kiu atingis la muron; kaj la
tuta popolo, kiu estis kun Joab, komencis detrui, por
faligi la muron. 16 Tiam ekkriis unu saĝa virino el la
urbo: Aŭskultu, aŭskultu; diru, mi petas, al Joab, ke li
alproksimiĝu ĉi tien, por ke mi parolu kun li. 17 Kiam
li alproksimiĝis al ŝi, la virino diris: Ĉu vi estas Joab?
Li respondis: Mi. Kaj ŝi diris al li: Aŭskultu la vortojn
de via sklavino. Li respondis: Mi aŭskultas. 18 Tiam
ŝi diris: En antaŭaj tempoj oni diradis: Demandu la
Abelanojn, kaj konforme al tio decidu. 19 Mi estas unu
el la pacemaj kaj fidelaj urboj de Izrael; vi volas ruinigi
urbon kaj patrinon en Izrael; por kio vi volas ekstermi
posedaĵon de la Eternulo? 20 Tiam Joab respondis kaj
diris: Mi tute, tute ne intencas ekstermi kaj ruinigi;
21 ne tia estas la afero; sed unu viro de la monto de
Efraim — Ŝeba, filo de Biĥri, estas lia nomo — levis
sian manon kontraŭ la reĝon David; donu lin solan,
kaj mi foriros de la urbo. Kaj la virino diris al Joab:
Jen lia kapo estos ĵetita al vi trans la muron. 22 Kaj la
virino venis al la tuta popolo kun sia saĝa parolo; kaj
ili dehakis la kapon de Ŝeba, filo de Biĥri, kaj ĵetis al
Joab. Tiam li ekblovis per trumpeto, kaj oni foriris de
la urbo ĉiu al sia tendo; kaj Joab revenis Jerusalemon
al la reĝo. 23 Joab estis super la tuta militistaro de
Izrael; kaj Benaja, filo de Jehojada, super la Keretidoj
kaj la Peletidoj; 24 kaj Adoram super la impostoj; kaj
Jehoŝafat, filo de Aĥilud, estis kronikisto; 25 kaj Ŝeva
estis skribisto; kaj Cadok kaj Ebjatar estis pastroj; 26
ankaŭ Ira, la Jairano, estis pastro ĉe David.

**21** Estis malsato en la tempo de David dum tri jaroj,
jaron post jaro. Kaj David faris demandon ĉe la
Eternulo; kaj la Eternulo respondis: Tio estas pro Saul
kaj pro la sangavida domo, pro tio, ke li mortigis la
Gibeonanojn. 2 Tiam la reĝo alvokis la Gibeonanojn,
kaj parolis kun ili. (Kaj la Gibeonanoj estis ne el la
Izraelidoj, sed el la restaĵoj de la Amoridoj; kaj la
Izraelidoj ĵuris al ili, sed Saul penis ekstermi ilin pro
sia fervoro por la Izraelidoj kaj Judoj.) 3 Kaj David
diris al la Gibeonanoj: Kion mi faru por vi, kaj per
kio mi pekliberiĝu, por ke vi benu la heredaĵon de la
Eternulo? 4 La Gibeonanoj diris al li: Ni ne postulas
arĝenton aŭ oron de Saul kaj de lia domo; kaj ni ne
volas, ke oni iun mortigu en Izrael. Kaj la reĝo diris:
Kion vi diros, tion mi faros por vi. 5 Tiam ili diris al la
reĝo: Pro tiu homo, kiu nin pereigis, kaj kiu atencis
kontraŭ ni, por nin ekstermi, por ke nenio restu el ni
en ĉiuj limoj de Izrael, 6 oni donu al ni sep virojn el
liaj filoj, kaj ni pendigu ilin antaŭ la Eternulo en Gibea
de Saul, la elektito de la Eternulo. Kaj la reĝo diris: Mi
donos. 7 Sed la reĝo indulgis Mefiboŝeton, filon de
Jonatan, filo de Saul, pro la ĵuro antaŭ la Eternulo,
kiu ekzistis inter ili, inter David kaj Jonatan, filo de
Saul. 8 Kaj la reĝo prenis Armonin kaj Mefiboŝeton,

la du filojn de Ricpa, filino de Aja, kiujn ŝi naskis al
Saul, kaj la kvin filojn de Miĥal, filino de Saul, kiujn ŝi
naskis al Adriel, filo de Barzilaj, la Meĥolatano. 9 Kaj
li transdonis ilin en la manojn de la Gibeonanoj, kaj ĉi
tiuj pendigis ilin sur la monto antaŭ la Eternulo. Tiel
ili falis sepope kune; ili estis mortigitaj en la unuaj
tagoj de la rikolto, en la komenco de la rikolto de
hordeo. 10 Tiam Ricpa, filino de Aja, prenis sakon,
kaj etendis ĝin super si ĉe la roko, de la komenco de
la rikolto ĝis ekpluvis sur ilin el la ĉielo; kaj ŝi ne
permesis, ke la birdoj de la ĉielo ripozu sur ili tage,
nek la kampaj bestoj nokte. 11 Oni raportis al David,
kion faris Ricpa, filino de Aja kaj kromvirino de Saul.
12 Tiam David iris, kaj prenis la ostojn de Saul kaj
la ostojn de lia filo Jonatan de la loĝantoj de Jabeŝ
en Gilead, kiuj forŝtelis ilin el la strato de Bet-Ŝan,
kie pendigis ilin la Filiŝtoj en la tago, kiam la Filiŝtoj
venkobatis Saulon sur Gilboa. 13 Kaj li forportis de tie
la ostojn de Saul kaj la ostojn de lia filo Jonatan; kaj
oni kunigis ilin kun la ostoj de la pendigitoj. 14 Kaj
oni enterigis la ostojn de Saul kaj de lia filo Jonatan
en la tero de Benjamen, en Cela, en la tombo de lia
patro Kiŝ; kaj oni faris ĉion, kion ordonis la reĝo. Post
tio Dio repaciĝis kun la tero. 15 Estis denove milito
inter la Filiŝtoj kaj la Izraelidoj. Kaj iris David kune
kun siaj servantoj, kaj batalis kontraŭ la Filiŝtoj. Kaj
David laciĝis. 16 Jiŝbi-benob, el la infanoj de giganto,
li, kies lanco havis la pezon de tricent sikloj da kupro,
kaj kiu estis zonita per nova glavo, intencis mortigi
Davidon. 17 Sed venis kun helpo Abiŝaj, filo de Ceruja,
kaj li frapis la Filiŝton kaj mortigis lin. Tiam la viroj
de David ĵuris al li, dirante: Vi devas ne plu iri kun ni
en militon, por ke ne estingiĝu la lucerno de Izrael. 18
Post tio estis denove milito kontraŭ la Filiŝtoj en Gob;
tiam Sibĥaj, la Ĥuŝaido, mortigis Safon, kiu estis el
la infanoj de la giganto. 19 Kaj denove estis milito
kontraŭ la Filiŝtoj en Gob; kaj Elĥanan, filo de Jaare-
Orgim, Bet-Leĥemano, mortigis Goljaton, la Gatanon,
ĉe kiu la tenilo de lia lanco estis kiel rultrabo de
teksisto. 20 Kaj denove estis milito en Gat; tie estis viro
tre altkreska, kiu havis sur la manoj kaj sur la piedoj
po ses fingroj, sume dudek kvar; li ankaŭ naskiĝis al
la giganto. 21 Kiam li insultis Izraelon, lin mortigis
Jonatan, filo de Ŝimea, frato de David. 22 Tiuj kvar
naskiĝis al la giganto en Gat, kaj ili falis de la mano de
David kaj de la mano de liaj servantoj.

**22** Kaj David eldiris antaŭ la Eternulo la vortojn
de la sekvanta kanto, kiam la Eternulo lin savis
el la manoj de ĉiuj liaj malamikoj kaj el la mano de
Saul. 2 Li diris: La Eternulo estas mia Roko, kaj mia
fortikaĵo, kaj mia Savanto. 3 Dion, mian Rokon, mi
fidas; Mia ŝildo, kaj la korno de mia savo, mia fortigo,
kaj mia rifuĝejo; Mia Savanto, kiu helpas min kontraŭ
maljusteco. 4 Mi vokas al la Eternulo, la glorinda; Kaj
mi saviĝas de miaj malamikoj. 5 Ĉar ĉirkaŭis min la
ondoj de la morto, Torentoj pereigaj min teruris; 6 La
ŝnuroj de Ŝeol min ĉirkaŭis; La retoj de la morto min
atingis. (Sheol h7585) 7 En mia premiteco mi vokis la
Eternulon, Kaj al mia Dio mi vokis; Kaj el Sia templo Li
aŭdis mian voĉon, Kaj mia krio atingis Liajn orelojn.
8 Ektremis kaj ekskuiĝis la tero, La fundamentoj de
la ĉielo ekmoviĝis Kaj ekŝanceliĝis, ĉar Li koleris. 9
Leviĝis fumo el Lia nazo, Kaj ekstermanta fajro el Lia
buŝo; Karboj ekflamis de ĝi. 10 Li klinis la ĉielon kaj iris
malsupren, Kaj densa mallumo estis sub Liaj piedoj. 11
Kaj Li ekrajdis sur kerubo kaj ekflugis, Kaj Li portiĝis
sur la flugiloj de la vento. 12 Li ĉirkaŭigis Sin per
mallumo kiel per tendo, Per densaj nuboj, plenaj de
akvo. 13 De la brilo antaŭ Li Ekbrulis karboj per fajro.
14 El la ĉielo ektondris la Eternulo, Kaj la Plejaltulo
aŭdigis Sian voĉon. 15 Li ĵetis sagojn, kaj dispelis ilin;
fulmon, kaj konfuzis ilin. 16 Kaj malkovriĝis la kuŝujoj
de la maro, Nudiĝis la fundamentoj de la universo, De
la minaca voĉo de la Eternulo, De la kolera spirado
de Lia nazo. 17 Li etendas el supre la brakon, kaj
prenas min; Li eltiras min el grandaj akvoj; 18 Li savas
min de mia potenca malamiko, De miaj malamantoj,
ĉar ili estas pli fortaj ol mi. 19 Ili atingis min en la
tago de mia malfeliĉo; Sed la Eternulo fariĝis mia
subteno. 20 Kaj Li elkondukis min en vastan lokon; Li
liberigis min, ĉar Li estas favora al mi. 21 La Eternulo
rekompencas min laŭ mia justeco; Laŭ la pureco de
miaj manoj Li repagas al mi. 22 Ĉar mi min tenis je la
vojoj de la Eternulo, Kaj mi ne faris malbonon antaŭ
mia Dio. 23 Ĉar ĉiuj Liaj leĝoj estis antaŭ mi, Kaj Liajn
ordonojn mi ne forigis de mi. 24 Mi estis senkulpa
antaŭ Li, Kaj mi gardis min, ke mi ne peku. 25 Kaj la
Eternulo rekompencis min laŭ mia justeco, Laŭ mia
pureco antaŭ Liaj okuloj. 26 Kun favorkorulo Vi estas
favorkora, Kun piulo Vi estas pia; 27 Kun purulo Vi
agas laŭ lia pureco, Kaj kun maliculo laŭ lia maliceco.
28 Popolon humilan Vi helpas; Kaj per Viaj okuloj Vi
malaltigas la fierulojn. 29 Ĉar Vi estas mia lumilo, ho

Eternulo; La Eternulo lumigas mian mallumon. 30 Ĉar
kun Vi mi forkurigas militistaron; Kun mia Dio mi
transsaltas muron. 31 La vojo de Dio estas perfekta; La
parolo de la Eternulo estas tute pura; Li estas ŝildo
por ĉiuj, kiuj Lin fidas. 32 Ĉar kiu estas Dio, krom la
Eternulo? Kaj kiu estas Roko, krom nia Dio? 33 Dio
fortikigas min per forto; Kaj Li perfektigas mian vojon.
34 Li similigas miajn piedojn al cervaj, Kaj starigas min
sur miaj altaĵoj. 35 Li instruas mian manon militi, Kaj
miajn brakojn streĉi kupran pafarkon. 36 Vi donis al
mi la ŝildon de Via savo; Kaj Via favoro min grandigas.
37 Vi larĝigas mian paŝon sub mi, Por ke ne ŝanceliĝu
miaj piedoj. 38 Mi persekutas miajn malamikojn, kaj
ekstermas ilin; Kaj mi ne revenas, ĝis mi ilin pereigas.
39 Mi pereigas kaj frakasas ilin, ke ili ne povas plu
leviĝi; Ili falas sub miajn piedojn. 40 Vi ĉirkaŭzonas
min per forto por la milito; Miajn atakintojn Vi ĵetas
sub min. 41 Vi forkurigas de mi miajn malamikojn,
Kaj miajn malamantojn mi ekstermas. 42 Ili rigardas
ĉirkaŭen, sed ne venas helpanto; Al la Eternulo, sed
Li ne respondas al ili. 43 Mi disfrotas ilin simile al
polvo de la tero; Kiel stratan koton mi ilin disbatas
kaj dispremas. 44 Vi savas min de la ribeloj de mia
popolo; Vi gardas min, ke mi estu ĉefo super la nacioj;
Popolo, kiun mi ne konas, servas min. 45 Aligentuloj
respektegas min; Ili obeas min per atentaj oreloj.
46 Aligentuloj senfortiĝas, Kaj kuras terurite el siaj
fortikaĵoj. 47 Vivas la Eternulo; kaj benata estu mia
Roko; Alte glorata estu mia Dio, la Roko de mia savo:
48 Tiu Dio, kiu donas al mi venĝon Kaj submetas al mi
popolojn; 49 Kiu forkondukas min de miaj malamikoj,
Altigas min super miaj atakintoj, Kaj savas min de
perfortulo. 50 Tial mi gloras Vin, ho Eternulo, inter
la popoloj, Kaj pri Via nomo mi kantas. 51 Li donas
grandan helpon al Sia reĝo, Kaj faras favoraĵon al Sia
sanktoleito, Al David kaj al lia idaro, por eterne.

**23** Jen estas la lastaj vortoj de David: Parolas David,
filo de Jiŝaj, Kaj parolas la viro, kiu estas alte
levita, La sanktoleito de la Dio de Jakob, Kantverkisto
en Izrael: 2 La spirito de la Eternulo parolas per mi,
Kaj Lia vorto estas sur mia lango. 3 La Dio de Izrael
parolis, Al mi diris la Roko de Izrael: Justulo regas
super homoj, Li regas en timo antaŭ Dio. 4 Kaj li
estas kiel la lumo de mateno, Kiam leviĝas la suno,
De mateno sennuba, Kiam post la pluvo Elkreskas la
verdaĵo el la tero. 5 Ĉu ne tiel estas mia domo ĉe la
Eternulo? Ĉar Li faris kun mi eternan interligon, Kiu
estas bone aranĝita en ĉio, kaj observata; Ĉar mia tuta
savo, kaj ĉio, kion mi deziras, bone prosperas. 6 La
malbonaguloj ĉiuj estas kiel dornoj forĵetitaj, Kiujn
oni ne povas preni per la mano; 7 Sed se iu volas
ektuŝi ilin, Tiu devas armi sin per fero aŭ per stango
de lanco; Kaj per fajro ili estos forbruligitaj sur sia
loko. 8 Jen estas la nomoj de la herooj, kiuj estis ĉe
David: sidanta en la konsilantaro de la saĝuloj, estro
de trio, estis Adino, la Ecnido, kiu mortigis okcent
malamikojn per unu fojo. 9 Post li estis Eleazar, filo de
Dodo, filo de Aĥoĥido, en la nombro de la tri herooj
ĉe David. Kiam ili mokis la Filiŝtojn kaj kolektiĝis tie
por batalo kaj la Izraelidoj eliris, 10 tiam li leviĝis kaj
frapis la Filiŝtojn, ĝis lia mano laciĝis kaj alrigidiĝis al
la glavo; kaj la Eternulo donis grandan helpon en tiu
tago, kaj la popolo returniĝis post li nur por rabakiri.
11 Post li estis Ŝama, filo de Age, la Hararano. Kiam la
Filiŝtoj kolektiĝis amase en loko, kie estis kampoparto
plena de lentoj, kaj la popolo forkuris de la Filiŝtoj,
12 tiam li stariĝis en la mezo de la kampoparto, kaj
savis ĝin kaj venkobatis la Filiŝtojn; kaj la Eternulo
donis grandan helpon. 13 Kaj iris tri el la tridek ĉefoj,
kaj venis dum la rikoltado al David en la kavernon
Adulam; kaj la amaso de la Filiŝtoj staris tendare en la
valo Refaim. 14 David tiam estis en fortikaĵo, kaj la
garnizono de la Filiŝtoj estis tiam en Bet-Leĥem. 15
Kaj David esprimis deziron kaj diris: Kiu trinkigus al
mi akvon el la puto Bet-Leĥema, kiu estas apud la
pordego? 16 Tiam tiuj tri herooj trarompe penetris en
la tendaron de la Filiŝtoj, ĉerpis akvon el la puto Bet-
Leĥema, kiu estis apud la pordego, prenis kaj alportis
al David. Sed li ne volis trinki ĝin; li elverŝis ĝin al la
Eternulo, 17 kaj diris: Gardu min, ho Eternulo, ke mi
ne faru tion; ĉu mi trinku la sangon de la viroj, kiuj
riskis sian vivon? Kaj li ne volis trinki ĝin. Tion faris
la tri herooj. 18 Abiŝaj, frato de Joab, filo de Ceruja,
estis estro de tiuj tri; li mortigis per sia lanco tricent
homojn, kaj li havis gloran nomon inter la tri. 19 De la
tri li estis honorata kaj estis ilia estro; sed en la trion
li ne eniris. 20 Benaja, filo de Jehojada, filo de militisto
multe aginta, el Kabceel: li mortigis la du fortulojn de
Moab; li ankaŭ malsupreniris, kaj mortigis leonon en
kavo en neĝa tago. 21 Li ankaŭ mortigis Egipton, viron
dignaspektan; en la mano de la Egipto estis lanco; sed
li aliris al li kun bastono, elŝiris la lancon el la mano
de la Egipto, kaj mortigis lin per lia propra lanco. 22

Tion faris Benaja, filo de Jehojada. Kaj li havis gloran
nomon inter la tri herooj. 23 Inter la tridek li estis
plej honorata, sed en la trion li ne eniris. Kaj David
faris lin lia korpogardistestro. 24 Asahel, frato de Joab,
estis inter la tridek; Elĥanan, filo de Dodo, el Bet-
Leĥem, 25 Ŝama el Ĥarod, Elika el Ĥarod, 26 Ĥelec,
la Paltido, Ira, filo de Ikeŝ, la Tekoaano, 27 Abiezer
la Anatotano, Mebunaj, la Ĥuŝaido, 28 Calmon, la
Aĥoĥido, Maharaj, la Netofaano, 29 Ĥeleb, filo de
Baana, la Netofaano, Itaj, filo de Ribaj, el Gibea de
la Benjamenidoj, 30 Benaja, la Piratonano, Hidaj el
Naĥale-Gaaŝ, 31 Abi-Albon, la Arbatano, Azmavet, la
Baĥurimano, 32 Eljaĥba, la Ŝaalbonano, Jonatan el
la filoj de Jaŝen, 33 Ŝama, la Hararano, Aĥiam, filo
de Ŝarar, la Hararano, 34 Elifelet, filo de Aĥasbaj, la
Maaĥatano, Eliam, filo de Aĥitofel, la Giloano, 35
Ĥecraj, la Karmelano, Paaraj, la Arbano, 36 Jigal, filo de
Natan, el Coba, Bani, la Gadido, 37 Celek, la Amonido,
Naĥaraj, la Beerotano, armilportisto de Joab, filo de
Ceruja, 38 Ira, la Jetrido, Gareb, la Jetrido, 39 Urija, la
Ĥetido. La nombro de ĉiuj estas tridek sep.

**24** La kolero de la Eternulo denove ekflamis kontraŭ
la Izraelidoj, kaj Li incitis Davidon kontraŭ ili,
dirante: Iru, kalkulu Izraelon kaj Jehudan. 2 Kaj la
reĝo diris al Joab, la militestro, kiu estis ĉe li: Iru, mi
petas, tra ĉiuj triboj de Izrael, de Dan ĝis Beer-Ŝeba,
kaj kalkulu la popolon, por ke mi sciu la nombron de
la popolo. 3 Tiam Joab diris al la reĝo: La Eternulo, via
Dio, plimultigu la popolon centoble kompare kun tio,
kio estas nun, kaj la okuloj de mia sinjoro tion vidu;
sed por kio mia sinjoro la reĝo deziras tiun aferon?
4 Sed la vorto de la reĝo superfortis Joabon kaj la
militestrojn; tial Joab kaj la militestroj foriris de la
reĝo, por kalkuli la popolon Izraelan. 5 Ili transiris
Jordanon, kaj starigis siajn tendojn en Aroer, dekstre
de la urbo, kiu estas meze de la valo Gad, antaŭ
Jazer; 6 kaj ili venis en Gileadon kaj en la landon
Taĥtim-Ĥodŝi; poste ili venis en Dan-Jaanon kaj en
la ĉirkaŭaĵon de Cidon. 7 Ili venis al la fortikaĵo de
Tiro, kaj en ĉiujn urbojn de la Ĥividoj kaj Kanaanidoj,
kaj eliris en la sudon de Judujo al Beer-Ŝeba. 8 Ili
trapasis la tutan landon, kaj venis Jerusalemon post
naŭ monatoj kaj dudek tagoj. 9 Kaj Joab transdonis
al la reĝo la rezulton de la kalkulado de la popolo;
kaj montriĝis, ke da Izraelidoj estas okcent mil viroj
militkapablaj, povantaj eltiri glavon, kaj da Jehudaidoj
kvincent mil viroj. 10 Kaj ekbatis la koro de David,
post kiam li kalkuligis la popolon. Kaj David diris
al la Eternulo: Mi forte pekis per tio, kion mi faris;
kaj nun, ho Eternulo, pardonu do la malbonagon de
Via sklavo; ĉar mi agis tre malsaĝe. 11 David leviĝis
matene, kaj la Eternulo parolis al la profeto Gad, la
viziisto de David, dirante: 12 Iru kaj diru al David:
Tiele diris la Eternulo: Tri punojn Mi proponas al vi;
elektu al vi unu el ili, ke Mi ĝin faru al vi. 13 Kaj Gad
venis al David kaj sciigis al li, kaj diris al li: Ĉu venu al
vi sepjara malsato en via lando? aŭ dum tri monatoj
vi forkuradu de viaj malamikoj kaj ili persekutu vin?
aŭ estu tritaga pesto en via lando? pripensu do kaj
decidu, kion mi respondu al mia Sendinto. 14 Tiam
David diris al Gad: Estas al mi tre malfacile; sed ni
falu en la manon de la Eternulo, ĉar granda estas Lia
kompatemeco; nur mi ne falu en manon homan. 15
Kaj la Eternulo venigis peston sur Izraelon, de tiu
mateno ĝis la difinita tempo; kaj mortis el la popolo
de Dan ĝis Beer-Ŝeba sepdek mil homoj. 16 Kaj la
anĝelo etendis sian manon kontraŭ Jerusalemon, por
pereigi ĝin; sed la Eternulo bedaŭris la malbonon, kaj
diris al la anĝelo, kiu ekstermis la popolon: Sufiĉe!
nun haltigu vian manon! La anĝelo de la Eternulo
estis tiam ĉe la draŝejo de Aravna, la Jebusido. 17
Kaj, ekvidinte la anĝelon, kiu frapis la popolon, David
ekparolis al la Eternulo, dirante: Jen mi pekis, kaj mi
malbonagis; sed kion faris ĉi tiuj ŝafoj? Via mano estu
sur mi kaj sur la domo de mia patro. 18 En tiu tago
venis Gad al David, kaj diris al li: Iru, starigu altaron al
la Eternulo en la draŝejo de Aravna, la Jebusido. 19 Kaj
David iris konforme al la vortoj de Gad, kiel ordonis la
Eternulo. 20 Aravna ekrigardis, kaj ekvidis la reĝon
kaj liajn servantojn, kiuj iris al li; kaj Aravna eliris, kaj
adorkliniĝis al la reĝo vizaĝaltere. 21 Kaj Aravna diris:
Por kio mia sinjoro la reĝo venis al sia sklavo? David
respondis: Por aĉeti de vi la draŝejon, kaj konstrui
altaron al la Eternulo, por ke ĉesiĝu la pesto inter
la popolo. 22 Sed Aravna diris al David: Mia sinjoro
la reĝo prenu kaj alportu oferojn, kiel plaĉas al li;
jen estas bovoj por brulofero, kaj la draŝiloj kaj la
jungilaro de la bovoj servos kiel ligno. 23 Ĉion tion
donis Aravna al la reĝo. Kaj Aravna diris al la reĝo: La
Eternulo, via Dio, favoru vin. 24 Tamen la reĝo diris al
Aravna: Ne; mi volas aĉeti de vi pro difinita prezo;
mi ne alportos al la Eternulo, mia Dio, bruloferojn
senpagajn. Kaj David aĉetis la draŝejon kaj la bovojn

pro kvindek sikloj da arĝento. 
25 Kaj David konstruis
tie altaron al la Eternulo, kaj alportis bruloferojn kaj
pacoferojn. Kaj la Eternulo repaciĝis kun la lando; kaj
ĉesiĝis la pesto inter la Izraelidoj.

# 1 Reĝoj

1 La reĝo David maljuniĝis kaj atingis profundan
aĝon; kaj oni kovris lin bone per vestoj, sed li ne
povis varmiĝi. 2 Tiam diris al li liaj servantoj: Oni
elserĉu por nia sinjoro la reĝo junulinon virgulinon,
kaj ŝi staru antaŭ la reĝo kaj flegu lin kaj dormu ĉe lia
brusto, kaj tiam al nia sinjoro la reĝo fariĝos varme.
3 Kaj oni serĉis belan junulinon en la tuta regiono
de Izrael, kaj oni trovis la Ŝunemaninon Abiŝag kaj
venigis ŝin al la reĝo. 4 La junulino estis tre bela;
kaj ŝi fariĝis flegantino de la reĝo kaj servis al li;
sed la reĝo ne ekkonis ŝin. 5 Dume Adonija, filo de
Ĥagit, fieriĝis, kaj diris: Mi fariĝos reĝo. Kaj li havigis
al si ĉarojn kaj rajdistojn kaj kvindek homojn por
kuradi antaŭ li. 6 Kaj lia patro neniam afliktis lin
per demando: Kial vi tion faras? Krom tio li estis
tre belaspekta, kaj li estis naskita post Abŝalom. 7
Kaj li interkonsentis kun Joab, filo de Ceruja, kaj
kun la pastro Ebjatar, kaj ili helpadis Adonijan. 8
Sed la pastro Cadok, kaj Benaja, filo de Jehojada, kaj
la profeto Natan kaj Ŝimei kaj Rei kaj la fortuloj de
David ne estis kun Adonija. 9 Adonija buĉis ŝafojn kaj
bovojn kaj grasigitajn brutojn ĉe la ŝtono Zoĥelet, kiu
kuŝas apud En-Rogel; kaj li invitis ĉiujn siajn fratojn,
la filojn de la reĝo, kaj ĉiujn Jehudaanojn, kiuj servis
al la reĝo. 10 Sed la profeton Natan kaj Benajan kaj la
fortulojn kaj sian fraton Salomono li ne invitis. 11 Kaj
Natan diris al Bat-Ŝeba, patrino de Salomono, jene:
Ĉu vi ne aŭdis, ke Adonija, filo de Ĥagit, fariĝis reĝo,
kaj nia sinjoro David tion ne scias? 12 Venu do, mi
donos al vi konsilon, por ke vi savu vian animon kaj la
animon de via filo Salomono. 13 Iru kaj venu al la reĝo
David, kaj diru al li: Mia sinjoro, ho reĝo, vi ĵuris ja al
via servantino, dirante: Via filo Salomono reĝos post
mi, kaj li sidos sur mia trono; kial do Adonija fariĝis
reĝo? 14 Dum vi ankoraŭ estos parolanta tie kun la
reĝo, mi venos post vi kaj kompletigos viajn vortojn.
15 Kaj Bat-Ŝeba venis al la reĝo en la ĉambron; la reĝo
estis tre maljuna, kaj la Ŝunemanino Abiŝag servis
al la reĝo. 16 Bat-Ŝeba salutis kaj adorkliniĝis antaŭ
la reĝo; kaj la reĝo diris: Kio estas al vi? 17 Kaj ŝi
diris al li: Mia sinjoro, vi ĵuris al via servantino per la
Eternulo, via Dio: Via filo Salomono reĝos post mi,
kaj li sidos sur mia trono. 18 Sed nun jen Adonija
fariĝis reĝo; kaj vi, mia sinjoro, ho reĝo, tion ne scias.
19 Li buĉis multe da bovoj kaj grasigitaj brutoj kaj
ŝafoj, kaj invitis ĉiujn filojn de la reĝo kaj la pastron
Ebjatar kaj la militestron Joab, sed vian servanton
Salomono li ne invitis. 20 Sed vi, mia sinjoro, ho
reĝo — la okuloj de ĉiuj Izraelidoj estas turnitaj al
vi, por ke vi diru al ili, kiu sidos sur la trono de mia
sinjoro la reĝo post li. 21 Kiam mia sinjoro la reĝo
kuŝiĝos kun siaj patroj, tiam mi kaj mia filo Salomono
estos proklamitaj kulpuloj. 22 Dum ŝi ankoraŭ estis
parolanta kun la reĝo, venis la profeto Natan. 23 Kaj
oni raportis al la reĝo: Jen estas la profeto Natan;
kaj ĉi tiu venis antaŭ la reĝon kaj adorkliniĝis antaŭ
la reĝo vizaĝaltere. 24 Kaj Natan diris: Mia sinjoro,
ho reĝo! ĉu vi diris: Adonija fariĝos reĝo post mi,
kaj li sidos sur mia trono? 25 Ĉar li iris hodiaŭ kaj
buĉis multe da bovoj kaj grasigitaj brutoj kaj ŝafoj, kaj
invitis ĉiujn filojn de la reĝo kaj la militestron kaj la
pastron Ebjatar; kaj jen ili manĝas kaj trinkas antaŭ
li, kaj proklamas: Vivu la reĝo Adonija! 26 Sed min,
vian servanton, kaj la pastron Cadok, kaj Benajan,
filon de Jehojada, kaj vian servanton Salomono li ne
invitis. 27 Ĉu laŭ ordono de mia sinjoro la reĝo tio
fariĝis, kaj vi ne sciigis al via servanto, kiu sidos sur
la trono de mia sinjoro la reĝo post li? 28 Tiam la
reĝo David respondis kaj diris: Voku al mi Bat-Ŝeban.
Kaj ŝi venis antaŭ la reĝon kaj stariĝis antaŭ la reĝo.
29 Kaj la reĝo ĵuris kaj diris: Kiel vivas la Eternulo,
kiu liberigis mian animon el ĉiuj malfeliĉoj, 30 kiel
mi ĵuris al vi per la Eternulo, Dio de Izrael, dirante:
Via filo Salomono reĝos post mi kaj li sidos sur mia
trono anstataŭ mi — tiel mi faros hodiaŭ. 31 Tiam
Bat-Ŝeba salutis vizaĝaltere kaj adorkliniĝis antaŭ la
reĝo, kaj diris: Vivu mia sinjoro la reĝo David eterne!
32 Kaj la reĝo David diris: Voku al mi la pastron Cadok
kaj la profeton Natan, kaj Benajan, filon de Jehojada.
Kaj ili venis antaŭ la reĝon. 33 Kaj la reĝo diris al ili:
Prenu kun vi la servantojn de via sinjoro, kaj rajdigu
mian filon Salomono sur mia mulo kaj venigu lin en
Giĥonon. 34 Kaj tie la pastro Cadok kaj la profeto
Natan lin sanktoleu reĝo super Izrael; kaj blovu per
trumpeto, kaj proklamu: Vivu la reĝo Salomono! 35
Poste revenu, sekvante lin, kaj li venu kaj sidiĝu sur
mia trono; kaj li reĝos anstataŭ mi, al li mi ordonas
esti estro de Izrael kaj Jehuda. 36 Tiam respondis
Benaja, filo de Jehojada, al la reĝo, kaj diris: Amen!
tiel diru la Eternulo, Dio de mia sinjoro la reĝo. 37
Kiel la Eternulo estis kun mia sinjoro la reĝo, tiel Li
estu kun Salomono, kaj Li faru lian tronon pli granda,

ol la trono de mia sinjoro, la reĝo David. 38 Kaj iris
la pastro Cadok kaj la profeto Natan, kaj Benaja, filo
de Jehojada, kaj la Keretidoj kaj la Peletidoj, kaj ili
rajdigis Salomonon sur la mulo de la reĝo David kaj
kondukis lin en Giĥonon. 39 Kaj la pastro Cadok prenis
la kornon kun oleo el la tabernaklo kaj sanktoleis
Salomonon; kaj oni ekblovis per trumpeto, kaj la tuta
popolo diris: Vivu la reĝo Salomono! 40 Kaj la tuta
popolo ekiris post li, kaj la popolo muzikis per flutoj
kaj estis tre gaja, tiel ke la tero resonis de iliaj krioj. 41
Tion aŭdis Adonija, kaj ĉiuj invititoj, kiuj estis kun li;
ili jam finis la manĝadon; kaj aŭdis Joab la sonadon de
la trumpeto, kaj li diris: Kion signifas la tumulta bruo
de la urbo? 42 Kiam li estis ankoraŭ parolanta, jen
venis Jonatan, filo de la pastro Ebjatar. Kaj Adonija
diris: Eniru, ĉar vi estas brava homo kaj vi sciigos
bonon. 43 Kaj Jonatan respondis kaj diris al Adonija:
Jes, nia sinjoro la reĝo David faris Salomonon reĝo;
44 kaj la reĝo sendis kun li la pastron Cadok kaj la
profeton Natan, kaj Benajan, filon de Jehojada, kaj la
Keretidojn kaj la Peletidojn, kaj ili rajdigis lin sur la
mulo de la reĝo; 45 kaj la pastro Cadok kaj la profeto
Natan sanktoleis lin reĝo en Giĥon, kaj ili revenis
de tie gajaj, kaj la urbo tumultiĝis; tio estas la bruo,
kiun vi aŭdis. 46 Kaj Salomono jam sidiĝis sur la reĝa
trono. 47 Kaj jam venis la servantoj de la reĝo, por
gratuli nian sinjoron, la reĝon David, dirante: Via Dio
faru la nomon de Salomono pli fama, ol via nomo,
kaj Li faru lian tronon pri granda, ol via trono; kaj
la reĝo adorkliniĝis sur la kuŝejo. 48 Kaj ankaŭ tiele
diris la reĝo: Benata estu la Eternulo, Dio de Izrael,
kiu donis hodiaŭ sidanton sur mia trono, kaj miaj
okuloj vidas. 49 Kaj ektimis kaj leviĝis ĉiuj invititoj
de Adonija, kaj foriris ĉiu sian vojon. 50 Sed Adonija
timis Salomonon, kaj li leviĝis kaj iris kaj ekkaptis la
kornojn de la altaro. 51 Kaj oni raportis al Salomono
jene: Jen Adonija timas la reĝon Salomono, kaj li tenas
la kornojn de la altaro, dirante: La reĝo Salomono
ĵuru al mi hodiaŭ, ke li ne mortigos sian servanton
per glavo. 52 Kaj Salomono diris: Se li estos homo
brava, tiam eĉ unu el liaj haroj ne falos teren; sed
se en li troviĝos malbono, tiam li mortos. 53 Kaj la
reĝo Salomono sendis forprenigi lin de la altaro, kaj
li venis kaj adorkliniĝis antaŭ la reĝo Salomono; kaj
Salomono diris al li: Iru en vian domon.

2 Kiam por David alproksimiĝis la tempo por morti,
li testamentis al sia filo Salomono jene: 2 Mi foriras
la vojon de la tuta mondo; sed vi tenu vin forte kaj
estu viro. 3 Kaj observu la ordonojn de la Eternulo,
via Dio, irante laŭ Liaj vojoj, plenumante Liajn leĝojn,
ordonojn, decidojn, kaj regulojn, kiel estas skribite en
la instruo de Moseo, por ke vi estu saĝa en ĉio, kion vi
faros, kaj kien ajn vi vin turnos; 4 por ke la Eternulo
plenumu Sian vorton, kiun Li diris pri mi, parolante:
Se viaj filoj observos siajn vojojn, irante antaŭ Mi en
vero per sia tuta koro kaj per sia tuta animo, tiam
ne mankos ĉe vi viro sur la trono de Izrael. 5 Ankaŭ
vi scias, kion faris al mi Joab, filo de Ceruja, kion li
faris al la du militestroj de Izrael, al Abner, filo de
Ner, kaj al Amasa, filo de Jeter, ke li mortigis ilin kaj
verŝis militan sangon en tempo de paco kaj makulis
per milita sango sian zonon sur siaj lumboj kaj siajn
ŝuojn sur siaj piedoj. 6 Agu laŭ via saĝo, ke vi ne
lasu al liaj grizaj haroj iri en paco en Ŝeolon. (Sheol
h7585) 7 Sed al la filoj de Barzilaj, la Gileadano, faru
favoron, kaj ili estu inter la manĝantoj ĉe via tablo;
ĉar ili tiel alproksimiĝis al mi, kiam mi forkuris de
via frato Abŝalom. 8 Kaj jen ĉe vi estas Ŝimei, filo
de Gera, Benjamenido el Baĥurim; li malbenis min
per kruela malbeno, kiam mi iris al Maĥanaim; sed li
venis al mi renkonte ĉe Jordan, kaj mi ĵuris al li per la
Eternulo, dirante: Mi ne mortigos vin per glavo. 9 Sed
nun ne lasu lin senpuna, ĉar vi estas homo saĝa, kaj
vi scias, kion vi devas fari al li, por malsuprenigi liajn
grizajn harojn en sango en Ŝeolon. (Sheol h7585) 10 Kaj
David ekdormis kun siaj patroj, kaj oni lin enterigis
en la urbo de David. 11 La tempo, kiun David reĝis
super Izrael, estis kvardek jaroj: en Ĥebron li reĝis
sep jarojn, kaj en Jerusalem li reĝis tridek tri jarojn.
12 Kaj Salomono sidis sur la trono de sia patro David,
kaj lia reĝado tre fortikiĝis. 13 Adonija, filo de Ĥagit,
venis al Bat-Ŝeba, patrino de Salomono. Ŝi diris: Ĉu
kun paco vi venas? Kaj li respondis: Kun paco. 14 Kaj
li diris: Mi havas aferon al vi. Ŝi respondis: Parolu.
15 Kaj li diris: Vi scias, ke la regno apartenis al mi,
kaj al mi ĉiuj Izraelidoj turnis sian vizaĝon, ke mi
reĝu; sed la reĝado deturniĝis kaj transiris al mia
frato, ĉar de la Eternulo ĝi estis destinita al li. 16
Nun unu peton mi petas de vi, ne rifuzu al mi. Kaj ŝi
diris al li: Parolu. 17 Kaj li diris: Diru, mi petas, al la
reĝo Salomono (ĉar li ne rifuzos al vi), ke li donu al
mi la Ŝunemaninon Abiŝag kiel edzinon. 18 Kaj Bat-

Ŝeba diris: Bone, mi parolos pri vi kun la reĝo. 19
Kaj Bat-Ŝeba venis al la reĝo Salomono, por paroli
al li pri Adonija. La reĝo leviĝis renkonte al ŝi kaj
adorkliniĝis antaŭ ŝi kaj sidiĝis sur sia trono. Kaj oni
starigis tronon por la patrino de la reĝo, kaj ŝi sidiĝis
dekstre de li. 20 Kaj ŝi diris: Unu malgrandan peton mi
petos de vi, ne rifuzu al mi. Kaj la reĝo diris al ŝi: Petu,
mia patrino, ĉar mi ne rifuzos al vi. 21 Kaj ŝi diris:
La Ŝunemanino Abiŝag estu donata kiel edzino al via
frato Adonija. 22 Tiam respondis la reĝo Salomono
kaj diris al sia patrino: Kial vi petas la Ŝunemaninon
Abiŝag por Adonija? petu por li ankaŭ la reĝecon, ĉar
li estas mia pli aĝa frato — por li, kaj por la pastro
Ebjatar, kaj por Joab, filo de Ceruja. 23 Kaj la reĝo
Salomono ĵuris per la Eternulo, dirante: Tion kaj
pli faru al mi la Eternulo; kontraŭ sia vivo Adonija
diris tiujn vortojn. 24 Nun, kiel vivas la Eternulo,
kiu min konfirmis kaj min sidigis sur la trono de
mia patro David kaj kiu aranĝis al mi domon laŭ Sia
promeso, hodiaŭ Adonija estos mortigita. 25 Kaj la
reĝo Salomono sendis Benajan, filon de Jehojada, kaj
ĉi tiu frapis lin, kaj li mortis. 26 Kaj al la pastro Ebjatar
la reĝo diris: Iru en Anatoton, sur vian kampon; vi
meritas la morton, sed mi nun ne mortigos vin, ĉar
vi portis la keston de la Sinjoro, la Eternulo, antaŭ
mia patro David, kaj ĉar vi suferis ĉion, kion suferis
mia patro. 27 Kaj Salomono forigis Ebjataron, ke li ne
estu plu pastro al la Eternulo; por ke plenumiĝu la
vorto de la Eternulo, kiun Li diris pri la domo de Eli
en Ŝilo. 28 La famo pri tio atingis Joabon (ĉar Joab
aliĝis al Adonija, kvankam al Abŝalom li ne aliĝis);
kaj Joab forkuris en la tabernaklon de la Eternulo kaj
ekkaptis la kornojn de la altaro. 29 Oni raportis al la
reĝo Salomono, ke Joab forkuris en la tabernaklon de
la Eternulo kaj estas nun ĉe la altaro. Tiam Salomono
sendis Benajan, filon de Jehojada, dirante al li: Iru,
mortigu lin. 30 Benaja venis en la tabernaklon de la
Eternulo, kaj diris al li: Tiele diras la reĝo: Eliru! Sed
tiu respondis: Ne, ĉi tie mi mortu. Kaj Benaja raportis
tion al la reĝo, dirante: Tiele diris Joab, kaj tiele li
respondis al mi. 31 Tiam la reĝo diris al li: Faru, kiel li
diris, mortigu lin kaj enterigu lin; por ke vi forigu de
mi kaj de la domo de mia patro la senkulpan sangon,
kiun Joab verŝis. 32 La Eternulo refaligu lian sangon
sur lian kapon, pro tio, ke li mortigis du virojn, kiuj
estis pli virtaj kaj pli bonaj ol li, kaj li mortigis ilin per
glavo, dum mia patro David tion ne sciis: Abneron,
filon de Ner, militestron de Izrael, kaj Amasan, filon
de Jeter, militestron de Jehuda. 33 Ilia sango falu sur
la kapon de Joab kaj sur la kapon de lia idaro por
eterne; sed al David kaj al lia idaro kaj al lia domo
kaj al lia trono estu paco por eterne de la Eternulo.
34 Tiam Benaja, filo de Jehojada, iris kaj frapis lin
kaj mortigis lin, kaj oni enterigis lin en lia domo en
la dezerto. 35 Kaj la reĝo starigis Benajan, filon de
Jehojada, anstataŭ li kiel militestron, kaj la pastron
Cadok la reĝo starigis anstataŭ Ebjatar. 36 Kaj la reĝo
sendis por voki Ŝimein, kaj li diris al li: Konstruu al vi
domon en Jerusalem, kaj loĝu tie kaj nenien eliru el
tie; 37 se iun tagon vi eliros kaj transiros la torenton
Kidron, tiam sciu, ke vi nepre mortos; via sango estos
sur via kapo. 38 Kaj Ŝimei diris al la reĝo: Bone; kiel
diris mia sinjoro la reĝo, tiel via servanto faros. Kaj
Ŝimei loĝis en Jerusalem multe da tempo. 39 Sed post
paso de tri jaroj forkuris du sklavoj de Ŝimei al Aĥiŝ,
filo de Maaĥa, reĝo de Gat. Kaj oni sciigis al Ŝimei,
dirante: Jen viaj sklavoj estas en Gat. 40 Tiam Ŝimei
leviĝis, kaj selis sian azenon kaj iris en Gaton al Aĥiŝ,
por serĉi siajn sklavojn. Kaj Ŝimei iris, kaj revenigis
siajn sklavojn el Gat. 41 Kaj oni raportis al Salomono,
ke Ŝimei foriris el Jerusalem en Gaton kaj revenis. 42
Tiam la reĝo sendis, kaj vokigis Ŝimein, kaj diris al
li: Mi ĵurligis ja vin per la Eternulo kaj avertis vin,
dirante, ke se iun tagon vi ien ajn foriros, tiam sciu,
ke vi nepre mortos; kaj vi diris al mi: Bona estas tio,
kion mi aŭdis. 43 Kial do vi ne observis la ĵuron per la
Eternulo, kaj la ordonon, kiun mi faris al vi? 44 Kaj la
reĝo diris al Ŝimei: Vi scias la tutan malbonon, kiun
via koro scias kaj kiun vi faris al mia patro David; la
Eternulo repagu vian malbonon sur via kapo. 45 Sed
la reĝo Salomono estu benata, kaj la trono de David
staru forte antaŭ la Eternulo eterne. 46 Kaj la reĝo
ordonis al Benaja, filo de Jehojada, kaj ĉi tiu iris kaj
frapis tiun, kaj tiu mortis. Kaj la regno fortikiĝis en la
manoj de Salomono.

3 Kaj Salomono boparenciĝis kun Faraono, reĝo de
Egiptujo, kaj prenis filinon de Faraono kaj venigis
ŝin en la urbon de David, ĝis li finis la konstruadon
de sia domo kaj de la domo de la Eternulo kaj de la
muregoj de Jerusalem ĉirkaŭe. 2 Tamen la popolo
alportadis ankoraŭ oferojn sur altaĵoj, ĉar ĝis tiu
tempo ankoraŭ ne estis konstruita domo al la nomo
de la Eternulo. 3 Kaj Salomono amis la Eternulon,

irante laŭ la instrukcioj de sia patro David; tamen li
oferadis kaj incensadis sur altaĵoj. 4 Kaj la reĝo iris
en Gibeonon, por alporti tie oferojn, ĉar tie estis la
ĉefa altaĵo. Mil bruloferojn Salomono alportis sur tiu
altaro. 5 En Gibeon la Eternulo aperis al Salomono
nokte en sonĝo, kaj Dio diris: Petu, kion Mi donu
al vi. 6 Kaj Salomono diris: Vi faris al Via servanto,
mia patro David, multe da favoro, ĉar li iradis antaŭ
Vi en vero kaj en justeco kaj en pureco de la koro
koncerne Vin; kaj Vi konservis por li tiun grandan
favorecon, kaj Vi donis al li filon, kiu sidas nun sur
lia trono. 7 Kaj nun, ho Eternulo, mia Dio, Vi reĝigis
Vian servanton anstataŭ mia patro David; sed mi
estas malgranda junulo; mi ne scias, kiel eliri kaj
eniri. 8 Kaj Via servanto estas meze de Via popolo,
kiun Vi elektis, popolo granda, kiu ne povas esti
nombrata nek kalkulata pro sia multeco. 9 Donu do al
Via servanto koron, kiu povoscius regi Vian popolon,
distingi inter bono kaj malbono; ĉar kiu povas regi
tiun Vian potencan popolon? 10 Kaj tio plaĉis al la
Sinjoro, ke Salomono petis tion. 11 Kaj Dio diris al li:
Ĉar vi petis ĉi tion, sed ne petis por vi longan vivon
kaj ne petis por vi riĉecon kaj ne petis la animon
de viaj malamikoj, sed vi petis saĝon, por povoscii
regi, 12 tial jen Mi faras konforme al via parolo: jen
Mi donas al vi koron saĝan kaj kompreneman, tiel
ke simila al vi ekzistis neniu antaŭ vi, kaj post vi ne
aperos tia, kiel vi. 13 Sed ankaŭ tion, pri kio vi ne
petis, Mi donos al vi, riĉecon kaj gloron, tiamaniere,
ke ne ekzistos simila al vi inter la reĝoj dum via tuta
vivo. 14 Kaj se vi irados laŭ Miaj vojoj, observante
Miajn leĝojn kaj ordonojn, kiel iradis via patro David,
Mi longigos vian vivon. 15 Kaj Salomono vekiĝis, kaj
vidis, ke tio estis sonĝo. Kaj li venis en Jerusalemon
kaj stariĝis antaŭ la kesto de interligo de la Eternulo
kaj alportis bruloferojn kaj faris pacoferojn, kaj li
faris festenon por ĉiuj siaj servantoj. 16 Tiam venis du
virinoj malĉastistinoj al la reĝo kaj stariĝis antaŭ li. 17
Kaj unu el la virinoj diris: Ho mia sinjoro! mi kaj ĉi
tiu virino loĝas en unu domo; kaj mi naskis, loĝante
kun ŝi en la sama domo. 18 En la tria tago post mia
nasko naskis ankaŭ ĉi tiu virino; kaj ni estis kune,
estis neniu fremdulo kun ni en la domo, nur ni ambaŭ
estis en la domo. 19 Kaj la filo de ĉi tiu virino mortis
en la nokto, ĉar ŝi dormis sur li. 20 Kaj ŝi leviĝis meze
de la nokto kaj prenis mian filon de ĉe mi, kiam via
servantino dormis, kaj kuŝigis lin ĉe sia brusto, kaj
sian mortintan filon ŝi almetis al mia brusto. 21 Kiam
mi leviĝis matene, por suĉigi mian filon, jen li estas
senviva; sed kiam mi matene bone lin rigardis, mi
vidis, ke tio ne estas mia filo, kiun mi naskis. 22 Sed
la dua virino diris: Ne, mia filo estas la vivanta, kaj
via estas la mortinta. Kaj la unua diris: Ne, via filo
estas la mortinta, kaj mia estas la vivanta. Kaj tiel ili
parolis antaŭ la reĝo. 23 Tiam la reĝo diris: Unu diras:
Mia estas la vivanta filo, kaj via estas la mortinta; kaj
la dua diras: Ne, via filo estas la mortinta, kaj mia
filo estas la vivanta; 24 kaj la reĝo diris: Alportu al mi
glavon. Kaj oni alportis la glavon al la reĝo. 25 Kaj la
reĝo diris: Dishaku la vivantan infanon en du partojn,
kaj donu duonon al unu kaj duonon al la alia. 26 Tiam
la virino, kies filo estis la vivanta, ekparolis al la reĝo,
ĉar ekscitiĝis ŝia kompato al ŝia filo, kaj ŝi diris: Ho
mia sinjoro, donu al ŝi la infanon vivantan, sed ne
mortigu ĝin. Sed la dua diris: Nek mi havu, nek vi;
dishaku. 27 Tiam la reĝo respondis kaj diris: Donu al ŝi
la vivantan infanon, sed ne mortigu ĝin; ŝi estas ĝia
patrino. 28 Kaj ĉiuj Izraelidoj aŭdis pri la juĝo, kiun
juĝis la reĝo; kaj ili ektimis la reĝon, ĉar ili vidis, ke
en li estas saĝo de Dio, por fari juĝon.

4 Kaj la reĝo Salomono estis reĝo super la tuta Izrael.
2 Kaj jen estas la estroj, kiuj estis ĉe li: Azarja,
filo de Cadok, pastro; 3 Eliĥoref kaj Aĥija, filoj de
Ŝiŝa, skribistoj; Jehoŝafat, filo de Aĥilud, kronikisto; 4
kaj Benaja, filo de Jehojada, super la militistaro; kaj
Cadok kaj Ebjatar, pastroj; 5 kaj Azarja, filo de Natan,
super la administrantoj; kaj Zabud, filo de Natan,
pastro, amiko de la reĝo; 6 kaj Aĥiŝar super la palaco;
kaj Adoniram, filo de Abda, super la impostoj. 7 Kaj
Salomono havis dek du administrantojn super la tuta
Izrael, kaj ili liveradis provizaĵojn al la reĝo kaj al
lia domo; unu monaton en jaro ĉiu el ili devis liveri
provizaĵojn. 8 Kaj jen estas iliaj nomoj: Ben-Ĥur, sur la
monto de Efraim; 9 Ben-Deker, en Makac kaj Ŝaalbim
kaj Bet-Ŝemeŝ kaj Elon-Bet-Ĥanan; 10 Ben-Ĥesed, en
Arubot; al li apartenis Soĥo kaj la tuta regiono Ĥefer;
11 Ben-Abinadab, super la tuta regiono Dor; Tafat,
filino de Salomono, estis lia edzino; 12 Baana, filo
de Aĥilud, en Taanaĥ kaj Megido kaj super la tuta
Bet-Ŝean, kiu estas apud Cartan, malsupre de Jizreel,
de Bet-Ŝean ĝis Abel-Meĥola, ĝis trans Jokmeam; 13
Ben-Geber, en Ramot en Gilead; al li apartenis la
Vilaĝoj de Jair, filo de Manase, kiuj estis en Gilead;

al li apartenis la distrikto Argob, kiu estis en Baŝan,
sesdek grandaj urboj kun muregoj kaj kupraj rigliloj;
14 Aĥinadab, filo de Ido, en Maĥanaim; 15 Aĥimaac,
en la regiono de Naftali; ankaŭ li prenis Basmaton,
filinon de Salomono, kiel edzinon; 16 Baana, filo de
Ĥuŝaj, en la regiono de Aŝer kaj en Alot; 17 Jehoŝafat,
filo de Paruaĥ, en la regiono de Isaĥar; 18 Ŝimei,
filo de Ela, en la regiono de Benjamen; 19 Geber, filo
de Uri, en la regiono Gilead, en la lando de Siĥon,
reĝo de la Amoridoj, kaj de Og, reĝo de Baŝan. Unu
administranto estis en tiu tuta lando. 20 Jehuda kaj
Izrael estis grandnombraj kiel la sablo ĉe la maro; ili
manĝis kaj trinkis kaj estis gajaj. 21 Salomono regis
super ĉiuj regnoj, de la Rivero ĝis la lando Filiŝta
kaj ĝis la limo de Egiptujo; ili alportadis donacojn
kaj servadis al Salomono dum lia tuta vivo. 22 La
manĝprovizoj de Salomono por ĉiu tago estis: tridek
kor'oj da delikata faruno kaj sesdek kor'oj da simpla
faruno, 23 dek grasigitaj bovoj kaj dudek bovoj de
paŝtejo kaj cent ŝafoj, krom cervoj kaj gazeloj kaj
kapreoloj kaj grasigitaj birdoj. 24 Ĉar li regis super
la tuta transo de la Rivero, de Tifsaĥ ĝis Gaza, super
ĉiuj reĝoj de trans la Rivero; kaj li havis pacon kun
ĉiuj ĉirkaŭaj landoj. 25 Kaj Jehuda kaj Izrael sidis
en sendanĝereco, ĉiu sub siaj vinberbranĉoj kaj sub
sia figarbo, de Dan ĝis Beer-Ŝeba, dum la tuta vivo
de Salomono. 26 Kaj Salomono havis kvardek mil
stalojn por ĉarĉevaloj kaj dek du mil rajdistojn. 27
Kaj tiuj administrantoj liveradis manĝprovizojn por
la reĝo Salomono, kaj por ĉiuj, kiuj venadis al la
tablo de la reĝo Salomono, ĉiu en sia monato, nenion
mankigante. 28 Kaj la hordeon kaj pajlon por la ĉevaloj
kaj la kurĉevaloj ili liveradis al la loko, kie li estis, ĉiu
laŭ sia instrukcio. 29 Kaj Dio donis al Salomono saĝon
kaj tre multe da prudento kaj tre multe da spirito, kiel
la sablo ĉe la maro. 30 Kaj la saĝeco de Salomono estis
pli granda, ol la saĝeco de ĉiuj orientanoj kaj ol la
tuta saĝeco de Egiptujo. 31 Kaj li estis pli saĝa, ol ĉiuj
homoj, pli ol Etan la Ezraĥido, kaj Heman kaj Kalkol
kaj Darda, filoj de Maĥol; kaj li estis fama inter ĉiuj
popoloj ĉirkaŭe. 32 Kaj li eldiris tri mil sentencojn; kaj
la nombro de liaj kantoj estis mil kaj kvin. 33 Kaj li
parolis pri la arboj, de la cedro, kiu estas sur Lebanon,
ĝis la hisopo, kiu elkreskas el la muro; kaj li parolis pri
la brutoj kaj la birdoj kaj la rampaĵoj kaj la fiŝoj. 34 Kaj
oni venadis el ĉiuj popoloj, por aŭskulti la saĝecon de
Salomono, de ĉiuj reĝoj de la tero, kiuj aŭdis pri lia
saĝeco.

5 Ĥiram, reĝo de Tiro, sendis siajn servantojn al
Salomono, kiam li aŭdis, ke oni lin sanktoleis reĝo
anstataŭ lia patro; ĉar Ĥiram estis amiko de David
en la tuta tempo. 2 Kaj Salomono sendis al Ĥiram,
por diri: 3 Vi scias pri mia patro David, ke li ne povis
konstrui domon al la nomo de la Eternulo, lia Dio,
pro la militantoj, kiuj lin ĉirkaŭis, ĝis la Eternulo
metis ilin sub la plandojn de liaj piedoj. 4 Sed nun
la Eternulo, mia Dio, donis al mi ripozon ĉirkaŭe;
ne ekzistas kontraŭulo nek ia malbona malhelpo. 5
Tial jen mi intencas konstrui domon al la nomo de
la Eternulo, mia Dio, kiel la Eternulo parolis al mia
patro David, dirante: Via filo, kiun Mi sidigos anstataŭ
vi sur via trono, konstruos la domon al Mia nomo.
6 Ordonu do nun, ke oni haku por mi cedrojn de
Lebanon; kaj miaj servantoj estos kun viaj servantoj,
kaj pagon por viaj servantoj mi donos al vi tian, kian
vi diros; ĉar vi scias, ke ekzistas inter ni neniu, kiu
povus haki arbojn kiel la Cidonanoj. 7 Kiam Ĥiram
aŭdis la vortojn de Salomono, li tre ekĝojis, kaj diris:
Benata estu hodiaŭ la Eternulo, kiu donis al David
filon saĝan super tiu grandnombra popolo. 8 Kaj
Ĥiram sendis al Salomono, por diri: Mi aŭskultis tion,
kion vi sendis diri al mi; mi plenumos vian tutan
deziron pri la arboj cedraj kaj arboj cipresaj. 9 Miaj
servantoj malsuprenigos ilin de Lebanon al la maro,
kaj mi flosos ilin sur la maro ĝis la loko, pri kiu vi
sciigos al mi, kaj tie mi ilin disigos, kaj vi prenigos.
Kaj vi plenumu mian deziron, kaj donu manĝaĵon por
mia domo. 10 Kaj Ĥiram donis al Salomono lignon
cedran kaj lignon cipresan, kiom li nur volis. 11 Kaj
Salomono donis al Ĥiram dudek mil kor'ojn da tritiko
kiel manĝaĵon por lia domo kaj dudek kor'ojn da
plej pura oleo. Tiom Salomono donadis al Ĥiram
ĉiujare. 12 Kaj la Eternulo donis saĝon al Salomono,
kiel Li promesis al li. Kaj estis paco inter Ĥiram kaj
Salomono, kaj ili ambaŭ faris inter si interligon. 13
La reĝo Salomono prenis imposton de la tuta Izrael;
la imposto estis tridek mil viroj. 14 Kaj li sendis ilin
sur Lebanonon, po dek mil ĉiumonate, alterne; unu
monaton ili estis sur Lebanon kaj du monatojn en
sia domo. Adoniram administris tiun imposton. 15
Kaj Salomono havis sepdek mil ŝarĝoportistojn kaj
okdek mil montajn ŝtonhakistojn, 16 krom la tri mil

tricent oficistoj, kiujn Salomono starigis super la
laboroj kaj kiuj regis super la popolo okupita per la
laboroj. 17 Kaj la reĝo ordonis, ke oni elhaku grandajn
ŝtonojn, multekostajn ŝtonojn, por aranĝi por la domo
fundamenton el ŝtonoj ĉirkaŭhakitaj. 18 Kaj hakis la
konstruistoj de Salomono kaj la konstruistoj de Ĥiram
kaj la Gebalanoj, kaj pretigis lignon kaj ŝtonojn, por
konstrui la domon.

6 En la jaro kvarcent-okdeka post la eliro de la
Izraelidoj el la lando Egipta, en la kvara jaro de
la reĝado de Salomono, en la monato Ziv, tio estas
la dua monato, oni komencis konstrui la domon por
la Eternulo. 2 Kaj la domo, kiun la reĝo Salomono
konstruis por la Eternulo, havis la longon de sesdek
ulnoj, la larĝon de dudek, kaj la alton de tridek ulnoj.
3 Kaj la portiko antaŭ la templo de la domo havis la
longon de dudek ulnoj, konforme al la larĝo de la
domo; dek ulnoj estis ĝia larĝo antaŭ la domo. 4 Kaj li
faris en la domo fenestrojn fermeblajn kaj kovreblajn.
5 Kaj li aranĝis ĉe la muro de la domo galeriojn
ĉirkaŭ la muroj de la domo, ĉirkaŭ la templo kaj la
plejsanktejo, kaj li faris flankajn ĉambrojn ĉirkaŭe. 6
La malsupra galerio havis la larĝon de kvin ulnoj, la
meza havis la larĝon de ses ulnoj, kaj la tria havis la
larĝon de sep ulnoj; ĉar ĉirkaŭ la domo ekstere li faris
ŝtupaĵojn, por ne enfortikigi en la muroj de la domo.
7 Kiam la domo estis konstruata, ĝi estis konstruata el
ŝtonoj prete ĉirkaŭhakitaj; martelo aŭ hakilo aŭ ia
alia fera instrumento ne estis aŭdata en la domo dum
ĝia konstruado. 8 La pordo de la meza galerio estis
ĉe la dekstra flanko de la domo; kaj per ŝtuparo oni
povis supreniri en la mezan galerion kaj el la meza en
la trian. 9 Kaj li konstruis la domon kaj finis ĝin, kaj li
kovris la domon per traboj kaj tabuloj el cedroj. 10 Kaj
li konstruis la galeriojn ĉirkaŭ la tuta domo, havantajn
la alton de kvin ulnoj; kaj li kovris la domon per
cedra ligno. 11 Kaj la Eternulo ekparolis al Salomono,
dirante: 12 Koncerne la domon, kiun vi konstruas:
se vi irados laŭ Miaj leĝoj kaj plenumados Miajn
instrukciojn kaj observados ĉiujn Miajn ordonojn, por
agadi laŭ ili, tiam Mi plenumos Mian promeson pri vi,
kiun Mi eldiris al via patro David, 13 kaj Mi loĝos inter
la Izraelidoj kaj ne forlasos Mian popolon Izrael. 14
Kaj Salomono konstruis la domon kaj finis ĝin. 15 Kaj
li konstruis la murojn de la domo interne el cedraj
tabuloj; de la planko de la domo ĝis la plafono li kovris
interne per ligno, kaj li kovris la plankon de la domo
per cipresaj tabuloj. 16 Kaj li konstruis en la distanco
de dudek ulnoj de la rando de la domo cedrotabulan
muron de la planko ĝis la plafono, kaj li konstruis
tion interne por interna sanktejo, la plejsanktejo. 17
Kvardek ulnojn da longo havis la domo, tio estas la
antaŭa parto de la templo. 18 Sur la cedroj interne de
la domo estis skulptitaj tuberoj kaj floroj; ĉio estis
cedra, oni vidis nenian ŝtonon. 19 La plejsanktejon
li aranĝis en la domo por tio, ke oni starigu tie la
keston de interligo de la Eternulo. 20 La internon de
la plejsanktejo, kiu havis la longon de dudek ulnoj, la
larĝon de dudek ulnoj, kaj la alton de dudek ulnoj, li
tegis per pura oro, kaj ankaŭ la cedran altaron li tegis.
21 Kaj Salomono tegis la domon interne per pura oro,
kaj li tiris orajn ĉenojn antaŭ la plejsanktejo kaj tegis
ĝin per oro. 22 Kaj la tutan domon li tegis per oro,
absolute la tutan domon, kaj la tutan altaron antaŭ
la plejsanktejo li tegis per oro. 23 Kaj li faris en la
plejsanktejo du kerubojn el oleastra ligno, havantajn
la alton de dek ulnoj. 24 Kvin ulnojn havis unu flugilo
de kerubo, kaj kvin ulnojn la dua flugilo de kerubo;
dek ulnoj estis de unu fino de ĝiaj flugiloj ĝis la dua
fino de ĝiaj flugiloj. 25 Kaj dek ulnojn havis ankaŭ la
dua kerubo; la saman mezuron kaj la saman formon
havis ambaŭ keruboj. 26 La alto de unu kerubo estis
dek ulnoj, kaj tiel same ankaŭ de la dua kerubo. 27
Kaj li starigis la kerubojn meze de la interna parto de
la domo; kaj la flugiloj de la keruboj estis etenditaj,
kaj la flugilo de unu kerubo estis altuŝanta la muron,
kaj la flugilo de la dua kerubo estis altuŝanta la duan
muron; sed la flugiloj, kiuj estis direktitaj en la mezon
de la domo, estis altuŝantaj unu la alian. 28 Kaj li
tegis la kerubojn per oro. 29 Kaj sur ĉiuj muroj de la
domo ĉirkaŭe li faris skulptitajn figurojn de keruboj,
palmoj, kaj floroj, interne kaj ekstere. 30 Ankaŭ la
plankon de la domo li kovris per oro interne kaj
ekstere. 31 Ĉe la enirejo en la plejsanktejon li faris
pordojn el oleastra ligno kun kvinangulaj fostoj. 32
Sur du pordoj el oleastra ligno li faris skulptitajn
kerubojn kaj palmojn kaj florojn kaj tegis per oro; li
tegis per oro la kerubojn kaj la palmojn. 33 Ankaŭ ĉe
la enirejo en la templon li faris kvarangulajn fostojn
el oleastra ligno; 34 kaj du pordojn el cipresa ligno;
ambaŭ duonoj de unu pordo estis kunmeteblaj, kaj
ambaŭ duonoj de la dua pordo estis kunmeteblaj. 35
Kaj li faris sur ili kerubojn kaj palmojn kaj florojn kaj

tegis per oro ĝuste laŭ la skulptaĵo. 36 Kaj li konstruis
la internan korton el tri vicoj da ĉirkaŭhakitaj ŝtonoj
kaj el vico da cedraj traboj. 37 En la kvara jaro, en la
monato Ziv, estis fondita la domo de la Eternulo. 38
Kaj en la dek-unua jaro, en la monato Bul, tio estas en
la oka monato, la domo estis finita en ĉiuj siaj detaloj
kaj laŭ sia tuta plano; li konstruis ĝin dum sep jaroj.

7 Kaj sian domon Salomono konstruis dum dek tri
jaroj, kaj li finis sian tutan domon. 2 Kaj li konstruis
la domon de la arbaro Lebanona; ĝi havis la longon de
cent ulnoj, la larĝon de kvindek ulnoj, kaj la alton
de tridek ulnoj; sur kvar vicoj da cedraj kolonoj, kaj
cedraj traboj estis sur la kolonoj. 3 Kaj li kovris per
cedro la supron de la galerioj, kiuj estis sur kvardek
kvin kolonoj, po dek kvin en unu vico. 4 Kaj da
fenestraj kadroj estis tri vicoj, kaj fenestroj kontraŭ
fenestroj trifoje. 5 Kaj ĉiuj pordoj kaj la fostoj estis
kvarangulaj, kaj la fenestroj estis kontraŭ fenestroj
trifoje. 6 Kaj ĉambregon el kolonoj li faris, havantan la
longon de kvindek ulnoj kaj la larĝon de tridek ulnoj;
kaj ankoraŭ ĉambron antaŭ ili kaj kolonojn kaj sojlon
antaŭ ili. 7 Kaj tronan salonon, por tie juĝi, juĝan
salonon li faris, kaj ĉiujn plankojn li kovris per cedro.
8 Lia domo, en kiu li loĝis, en la malantaŭa korto
post la salono, estis aranĝita tiel same. Kaj li faris
ankaŭ domon, similan al tiu salono, por la filino de
Faraono, kiun Salomono prenis. 9 Ĉio ĉi tio estis farita
el multekostaj ŝtonoj, ĉirkaŭhakitaj laŭmezure, segitaj
per segilo, interne kaj ekstere, de la fundamento ĝis
la tegmento, kaj ekstere ĝis la granda korto. 10 En la
fundamento estis ŝtonoj multekostaj, ŝtonoj grandaj,
ŝtonoj de dek ulnoj kaj ŝtonoj de ok ulnoj. 11 Kaj supre
estis multekostaj ŝtonoj, ĉirkaŭhakitaj laŭmezure,
kaj cedro. 12 Kaj la granda ĉirkaŭa korto havis tri
vicojn da ĉirkaŭhakitaj ŝtonoj kaj unu vicon da cedraj
traboj; tiel same ankaŭ la interna korto de la domo
de la Eternulo kaj la salono ĉe la domo. 13 La reĝo
Salomono sendis, kaj venigis el Tiro Ĥuramon. 14 Li
estis filo de unu vidvino, el la tribo de Naftali; lia
patro estis Tirano, kupristo. Li estis plena de saĝeco,
kompetenteco, kaj sciado, por fari ĉian laboron el
kupro. Kaj li venis al la reĝo Salomono kaj plenumis
ĉiujn liajn laborojn. 15 Li faris du kuprajn kolonojn, el
kiuj unu kolono havis la alton de dek ok ulnoj, kaj
fadeno de dek du ulnoj prezentis la amplekson de la
dua kolono. 16 Kaj du kapitelojn, fanditajn el kupro,
li faris, por meti sur la suprojn de la kolonoj; kvin
ulnoj estis la alto de unu kapitelo, kaj kvin ulnoj la
alto de la dua kapitelo. 17 Retoj plektitaj kaj ŝnuretoj
ĉenoformaj estis ĉe la kapiteloj, kiuj estis supre de la
kolonoj; sep ĉe unu kapitelo kaj sep ĉe la dua. 18 Kaj
li faris la kolonojn tiel, ke du vicoj da granatoj estis
ĉirkaŭ unu reto, por kovri la kapitelon; tiel same li
faris ankaŭ por la dua kapitelo. 19 La kapiteloj sur la
kolonoj estis faritaj kiel la lilioj en la salono, kaj havis
kvar ulnojn. 20 Kaj la kapiteloj sur la du kolonoj super
la konveksaĵo, kiu estis apud la reto; kaj sur la dua
kapitelo ĉirkaŭe en vicoj ducent granatoj. 21 Kaj li
starigis la kolonojn antaŭ la salono de la templo; kaj li
starigis la dekstran kolonon kaj donis al ĝi la nomon
Jaĥin; kaj li starigis la maldekstran kolonon kaj donis
al ĝi la nomon Boaz. 22 Sur la suproj de la kolonoj
estis skulptaĵo en formo de lilio. Tiel estis finita la
laboro de la kolonoj. 23 Kaj li faris maron fanditan,
havantan dek ulnojn de rando ĝis rando, tute rondan,
havantan la alton de kvin ulnoj; kaj ŝnuro de tridek
ulnoj prezentis ĝian mezuron ĉirkaŭe. 24 Kaj tuberoj
sub ĝia rando troviĝis ĉirkaŭe de ĝi; sur la spaco de
dek ulnoj ili ĉirkaŭis la maron en du vicoj; la tuberoj
estis fanditaj kune kun ĝi. 25 Ĝi staris sur dek du bovoj;
tri kun la vizaĝo norden, tri kun la vizaĝo okcidenten,
tri kun la vizaĝo suden, kaj tri kun la vizaĝo orienten;
kaj la maro estis sur ili supre, kaj ĉiuj iliaj malantaŭaj
partoj estis turnitaj internen. 26 Ĝi havis la dikon
de manlarĝo; kaj ĝia rando, farita laŭ la maniero de
rando de kaliko, estis simila al disvolviĝinta lilio. Ĝi
ampleksis du mil bat'ojn. 27 Kaj li faris dek kuprajn
bazaĵojn; ĉiu bazaĵo havis la longon de kvar ulnoj, la
larĝon de kvar ulnoj, kaj la alton de tri ulnoj. 28 Kaj
jen estas la aranĝo de la bazaĵoj: ili havis muretojn,
muretojn inter la listeloj. 29 Kaj sur la muretoj, kiuj
estis inter la listeloj, estis leonoj, bovoj, kaj keruboj;
kaj sur la listeloj estis tiel supre, kaj sube de la leonoj
kaj bovoj estis malsuprenpendantaj festonoj. 30 Kaj
ĉiu bazaĵo havis kvar kuprajn radojn kun kupraj
aksoj, kaj ĝiaj kvar anguloj havis ŝultretojn, fanditajn
ŝultretojn sub la kaldrono, kaj sur ĉiu flanko estis
festonoj. 31 Ĝia aperturo de la interna kapitelo ĝis
la supro havis unu ulnon; ĝia aperturo estis ronda,
en formo de bazeto, havanta unu ulnon kaj duonon,
kaj ĉe la aperturo estis skulptaĵoj; sed ĝiaj muretoj
estis kvarangulaj, ne rondaj. 32 Kaj la kvar radoj estis
sub la muretoj, kaj la aksoj de la radoj estis en la

bazaĵo; la alto de ĉiu rado estis unu ulno kaj duono.
33 La aranĝo de la radoj estis kiel la aranĝo de radoj
de veturilo; iliaj aksoj kaj aksingoj kaj radradioj kaj
radrondoj, ĉio estis fandita. 34 Kaj la kvar ŝultretoj
ĉe la kvar anguloj de ĉiu bazaĵo elstaris el la bazaĵo
mem. 35 Supre de la bazaĵo estis rondaĵo, havanta la
alton de duono de ulno; kaj supre de la bazaĵo ĝiaj
teniloj kaj muretoj elstaris el ĝi mem. 36 Kaj sur la
tabuletoj de ĝiaj teniloj kaj sur ĝiaj muretoj li skulptis
kerubojn, leonojn, kaj palmojn, sur ĉiu libera loko,
kaj festonojn ĉirkaŭe. 37 Tiel li faris la dek bazaĵojn;
ĉiuj havis egalan fandon, egalan mezuron, egalan
formon. 38 Kaj li faris dek kuprajn lavujojn; ĉiu lavujo
havis la amplekson de kvardek bat'oj; kvar ulnojn
havis ĉiu lavujo; ĉiu lavujo staris sur unu bazaĵo el la
dek bazaĵoj. 39 Kaj li starigis la bazaĵojn, kvin ĉe la
dekstra flanko de la domo, kaj kvin ĉe la maldekstra
flanko; kaj la maron li starigis ĉe la dekstra flanko de
la domo, sudoriente. 40 Kaj Ĥuram faris la lavujojn kaj
la ŝovelilojn kaj la aspergajn kalikojn. Kaj Ĥuram finis
la tutan laboron, kiun li faris por la reĝo Salomono en
la domo de la Eternulo: 41 la du kolonojn kaj la du
globaĵojn de la kapiteloj sur la supro de la kolonoj, kaj
la du retojn por kovri la du globaĵojn de la kapiteloj,
kiuj estis sur la supro de la kolonoj; 42 kaj la kvarcent
granatojn ĉe la du retoj, po du vicoj da granatoj por
ĉiu reto, por kovri la du globaĵojn de la kapiteloj, kiuj
estis sur la kolonoj; 43 kaj la dek bazaĵojn kaj la dek
lavujojn sur la bazaĵoj; 44 kaj la unu maron kaj la dek
du bovojn sub la maro; 45 kaj la kaldronojn kaj la
ŝovelilojn kaj la aspergajn kalikojn. Kaj ĉiuj vazoj de la
templo, kiujn Ĥuram faris al la reĝo Salomono por la
domo de la Eternulo, estis el polurita kupro. 46 En la
ĉirkaŭaĵo de Jordan la reĝo fandigis ilin en argila tero,
inter Sukot kaj Cartan. 47 Kaj Salomono metis ĉiujn
vazojn sur ilian lokon. Pro la tre granda multo la pezo
de la kupro ne estis kalkulita. 48 Kaj Salomono faris
ĉiujn vazojn, kiuj estas en la domo de la Eternulo: la
oran altaron, kaj la oran tablon, sur kiu estas la pano
de propono; 49 kaj la kandelabrojn, kvin dekstre kaj
kvin maldekstre antaŭ la plejsanktejo, el pura oro; kaj
la florojn kaj lucernojn kaj prenilojn, el oro; 50 kaj la
tasojn, tranĉilojn, aspergajn kalikojn, kulerojn, kaj
karbujojn, el pura oro; kaj la maŝojn ĉe la pordo de la
interna domo, de la plejsanktejo, ĉe la pordo de la
templa domo, el oro. 51 Tiamaniere estis finita la tuta
laboro, kiun la reĝo Salomono faris por la domo de la
Eternulo. Kaj Salomono enportis la konsekritaĵojn de
sia patro David; la arĝenton kaj la oron kaj la vazojn li
metis en la trezorejojn de la domo de la Eternulo.

8 Tiam Salomono kunvenigis la plejaĝulojn de Izrael
kaj ĉiujn ĉefojn de la triboj, la estrojn de la
patrodomoj de la Izraelidoj, al la reĝo Salomono en
Jerusalemon, por transporti la keston de interligo
de la Eternulo el la urbo de David, tio estas el Cion.
2 Kaj kolektiĝis al la reĝo Salomono ĉiuj Izraelidoj
al la festo, en la monato Etanim, tio estas la sepa
monato. 3 Kaj venis ĉiuj plejaĝuloj de Izrael; kaj la
pastroj ekportis la keston. 4 Kaj oni enportis la keston
de la Eternulo kaj la tabernaklon de kunveno, kaj
ĉiujn sanktajn vazojn, kiuj estis en la tabernaklo; ilin
portis la pastroj kaj la Levidoj. 5 Kaj la reĝo Salomono,
kaj la tuta komunumo de Izrael, kiu kolektiĝis al
li, estis kun li antaŭ la kesto, oferbuĉante ŝafojn
kaj bovojn, kiujn oni ne povis nombri nek kalkuli
pro ilia granda multeco. 6 Kaj la pastroj venigis la
keston de interligo de la Eternulo sur ĝian lokon, en
la profundon de la domo, en la plejsanktejon, sub la
flugilojn de la keruboj. 7 Ĉar la keruboj havis siajn
flugilojn etenditaj super la loko de la kesto, kaj la
keruboj estis kovrantaj la keston kaj ĝiajn stangojn de
supre. 8 Kaj la stangoj estis tiel longaj, ke la kapetoj
de la stangoj estis videblaj el la sankta loko en la
antaŭa parto de la plejsanktejo, sed ekstere ili ne
estis videblaj; kaj ili restis tie ĝis la nuna tago. 9 En
la kesto estis nenio krom la du ŝtonaj tabeloj, kiujn
metis tien Moseo sur Ĥoreb, kiam la Eternulo faris
interligon kun la Izraelidoj post ilia eliro el la lando
Egipta. 10 Kiam la pastroj eliris el la sanktejo, nubo
plenigis la domon de la Eternulo. 11 Kaj la pastroj ne
povis stari kaj servi, pro la nubo; ĉar la majesto de la
Eternulo plenigis la domon de la Eternulo. 12 Tiam
Salomono ekparolis: La Eternulo diris, ke Li deziras
loĝi en mallumo; 13 tial mi konstruis domon por Via
loĝado, lokon por Via restado eterna. 14 Kaj la reĝo
turnis sian vizaĝon kaj benis la tutan komunumon
de Izrael; kaj la tuta komunumo de Izrael staris. 15
Kaj li diris: Benata estu la Eternulo, Dio de Izrael,
kiu parolis per Sia buŝo al mia patro David, kaj nun
plenumis per Sia mano, dirante: 16 De post la tago,
kiam Mi elkondukis Mian popolon Izrael el Egiptujo,
Mi elektis neniun urbon inter ĉiuj triboj de Izrael, por
konstrui domon, en kiu estus Mia nomo; sed Mi elektis

Davidon, ke li estu super Mia popolo Izrael. 17 Mia
patro David havis la intencon konstrui domon al la
nomo de la Eternulo, Dio de Izrael. 18 Sed la Eternulo
diris al mia patro David: Intencante konstrui domon
al Mia nomo, vi agis bone, havante tian intencon; 19
tamen la domon konstruos ne vi, sed nur via filo,
kiu eliris el viaj lumboj, konstruos la domon al Mia
nomo. 20 Kaj la Eternulo plenumis Sian vorton, kiun
Li diris: mi leviĝis anstataŭ mia patro David kaj sidiĝis
sur la trono de Izrael, kiel diris la Eternulo, kaj mi
konstruis la domon al la nomo de la Eternulo, Dio
de Izrael. 21 Kaj mi aranĝis tie lokon por la kesto, en
kiu troviĝas la interligo de la Eternulo, kiun Li faris
kun niaj patroj, kiam Li elkondukis ilin el la lando
Egipta. 22 Kaj Salomono stariĝis antaŭ la altaro de la
Eternulo kontraŭ la tuta komunumo de Izrael, kaj li
etendis siajn manojn al la ĉielo, 23 kaj li parolis: Ho
Eternulo, Dio de Izrael! ne ekzistas dio simila al Vi en
la ĉielo supre nek sur la tero malsupre; Vi konservas
la interligon kaj la favorkorecon al Viaj servantoj, kiuj
iradas antaŭ Vi per sia tuta koro; 24 Vi plenumis al
Via servanto David, mia patro, kion Vi promesis al
li; Vi parolis per Via buŝo, kaj Vi plenumis per Via
mano, kiel ni nun vidas. 25 Nun, ho Eternulo, Dio de
Izrael, plenumu al Via servanto David, mia patro, kion
Vi promesis al li, dirante: Ne mankos ĉe vi antaŭ Mi
viro, sidanta sur la trono de Izrael, se viaj filoj nur
observados sian vojon, por iradi antaŭ Mi, kiel vi iradis
antaŭ Mi. 26 Nun, ho Dio de Izrael, veriĝu Via vorto,
kiun Vi diris al Via servanto David, mia patro. 27 Ĉu
efektive Dio loĝus sur la tero? ja la ĉielo kaj la ĉielo de
ĉieloj ne povas Vin ampleksi; des pli tion ne povas ĉi
tiu domo, kiun mi konstruis! 28 Sed turnu Vin al la
preĝo de Via servanto kaj al lia petego, ho Eternulo,
mia Dio, por aŭskulti la vokadon kaj la preĝon, per
kiu Via servanto preĝas antaŭ Vi hodiaŭ; 29 por ke
Viaj okuloj estu nefermitaj super ĉi tiu domo nokte
kaj tage, super la loko, pri kiu Vi diris: Mia nomo
tie estos; por aŭskulti la preĝon, kiun Via servanto
faros sur ĉi tiu loko. 30 Kaj aŭskultu la petegon de Via
servanto kaj de Via popolo Izrael, kiun ili preĝos sur ĉi
tiu loko; aŭskultu sur la loko de Via loĝado en la ĉielo;
kaj kiam Vi aŭskultos, Vi pardonu. 31 Kiam iu pekos
kontraŭ sia proksimulo, kaj oni postulos de li ĵuron,
ke li ĵuru, kaj la ĵuro estos farata antaŭ Via altaro en ĉi
tiu domo: 32 tiam aŭskultu en la ĉielo, kaj faru juĝon
pri Viaj servantoj, kondamnante la manbonagulon,
metante lian konduton sur lian kapon, kaj montrante
la pravecon de la virtulo, rekompencante lin laŭ
lia virteco. 33 Se Via popolo Izrael estos frapita de
malamiko pro tio, ke ĝi pekis antaŭ Vi, sed ili sin
returnos al Vi kaj gloros Vian nomon kaj preĝos kaj
petegos al Vi en ĉi tiu domo: 34 tiam aŭskultu en
la ĉielo, kaj pardonu la pekon de Via popolo Izrael,
kaj revenigu ilin sur la teron, kiun Vi donis al iliaj
patroj. 35 Se la ĉielo ŝlosiĝos tiel, ke ne estos pluvo
pro tio, ke ili pekis antaŭ Vi, sed ili ekpreĝos sur ĉi
tiu loko kaj gloros Vian nomon kaj returnos sin de
sia peko, por ke Vi aŭskultu ilin: 36 tiam aŭskultu
en la ĉielo, kaj pardonu la pekon de Viaj servantoj
kaj de Via popolo Izrael, montrante al ili la bonan
vojon, kiun ili devas iri, kaj donu pluvon sur Vian
landon, kiun Vi donis al Via popolo kiel heredaĵon.
37 Se estos malsato en la lando, aŭ se estos pesto,
brulsekeco, velkado, akridoj, aŭ vermoj, aŭ se premos
ilin malamiko en la lando de ilia loĝado, aŭ se estos ia
plago aŭ malsano; 38 ĉe ĉiu preĝo, ĉe ĉiu petego, kiu
venos de iu homo aŭ de Via tuta popolo Izrael, kiam
ĉiu el ili sentos malfeliĉon en sia koro kaj etendos
siajn manojn al ĉi tiu domo: 39 Vi aŭskultu en la ĉielo,
en la loko de Via loĝado, kaj pardonu, kaj faru kaj
redonu al ĉiu konforme al lia tuta konduto, kiel Vi
konas lian koron (ĉar Vi sola konas la koron de ĉiuj
homidoj); 40 por ke ili Vin timu dum la tuta tempo,
kiun ili vivas sur la tero, kiun Vi donis al niaj patroj.
41 Ankaŭ koncerne aligentulon, kiu ne estas el Via
popolo Izrael, sed venos el malproksima lando pro
Via nomo 42 (ĉar ili aŭdos pri Via granda nomo kaj
pri Via forta mano kaj pri Via etendita brako), kaj
li venos kaj preĝos en ĉi tiu domo: 43 Vi aŭskultu
en la ĉielo, en la loko de Via loĝado, kaj faru ĉion,
pri kio vokos al Vi la aligentulo; por ke ĉiuj popoloj
de la tero konu Vian nomon, por ke ili timu Vin,
kiel Via popolo Izrael, kaj por ke ili sciu, ke per Via
nomo estas nomata ĉi tiu domo, kiun mi konstruis. 44
Kiam Via popolo eliros milite kontraŭ sian malamikon
laŭ la vojo, laŭ kiu Vi ilin sendos, kaj ili preĝos al la
Eternulo, turninte sin al la urbo, kiun Vi elektis, kaj
al la domo, kiun mi konstruis al Via nomo: 45 tiam
aŭskultu en la ĉielo ilian preĝon kaj ilian petegon, kaj
defendu ilian aferon. 46 Se ili pekos antaŭ Vi (ĉar ne
ekzistas homo, kiu ne pekas), kaj Vi ekkoleros kontraŭ
ili kaj transdonos ilin al malamiko, kaj iliaj kaptintoj
forkondukos ilin en landon malamikan, malproksiman

aŭ proksiman; 47 sed ili rekonsciiĝos en la lando, en
kiu ili estos kaptitaj, konvertiĝos, kaj petegos Vin
en la lando de siaj kaptintoj, dirante: Ni pekis, ni
malbonagis, ni krimis; 48 kaj ili returnos sin al Vi per
sia tuta koro kaj per sia tuta animo en la lando de
siaj malamikoj, kiuj ilin kaptis, kaj ili preĝos al Vi,
turninte sin al sia lando, kiun Vi donis al iliaj patroj,
al la urbo, kiun Vi elektis, kaj al la domo, kiun mi
konstruis al Via nomo: 49 tiam aŭskultu en la ĉielo, en
la loko de Via loĝado, ilian preĝon kaj ilian petegon,
kaj defendu ilian aferon; 50 kaj pardonu al Via popolo
tion, per kio ili pekis antaŭ Vi, kaj ĉiujn iliajn krimojn,
kiujn ili faris kontraŭ Vi, kaj veku por ili kompaton
en iliaj kaptintoj, por ke ĉi tiuj estu favorkoraj al ili.
51 Ĉar ili estas Via popolo kaj Via heredaĵo, kiun Vi
elkondukis el Egiptujo, el la fera forno. 52 Viaj okuloj
estu malfermitaj al la petego de Via servanto kaj al
la petego de Via popolo Izrael, por ke Vi aŭdu ilin
pri ĉio, pri kio ili vokas al Vi. 53 Ĉar Vi distingis ilin
kiel Vian heredaĵon el ĉiuj popoloj de la tero, kiel
Vi diris per Via servanto Moseo, kiam Vi elkondukis
niajn patrojn el Egiptujo, ho Sinjoro, Eternulo. 54
Kiam Salomono finis preĝi antaŭ la Eternulo tiun
tutan preĝon kaj petegon, li leviĝis de sia genuado
antaŭ la altaro de la Eternulo, kaj liaj manoj estis
etenditaj al la ĉielo. 55 Kaj li stariĝis, kaj benis la
tutan komunumon de Izrael per laŭta voĉo, dirante:
56 Benata estu la Eternulo, kiu donis ripozon al Sia
popolo Izrael konforme al ĉio, kion Li diris: ne forfalis
eĉ unu vorto el ĉiuj Liaj bonaj vortoj, kiujn Li diris
per Sia servanto Moseo. 57 La Eternulo, nia Dio, estu
kun ni, kiel Li estis kun niaj patroj, Li ne forlasu nin
kaj ne forĵetu nin; 58 Li klinu nian koron al Si, por
ke ni iru laŭ ĉiuj Liaj vojoj, kaj por ke ni observu
Liajn ordonojn kaj Liajn leĝojn kaj Liajn regulojn,
kiujn Li donis al niaj patroj. 59 Kaj ĉi tiuj miaj vortoj,
kiujn mi preĝis antaŭ la Eternulo, estu proksimaj al
la Eternulo, nia Dio, tage kaj nokte, por ke Li faru
justaĵon al Sia servanto kaj justaĵon al Sia popolo
Izrael en ĉiuj tagoj; 60 por ke ĉiuj popoloj de la tero
sciu, ke la Eternulo estas Dio kaj ke ne ekzistas alia. 61
Via koro estu tute sindona al la Eternulo, nia Dio, por
iri laŭ Liaj leĝoj kaj por observi Liajn ordonojn, kiel
hodiaŭ. 62 Kaj la reĝo kaj kun li ĉiuj Izraelidoj buĉis
oferojn antaŭ la Eternulo. 63 Kaj Salomono oferis
la pacoferon, kiun li alportis al la Eternulo, dudek
du mil bovojn kaj cent dudek mil ŝafojn. Tiamaniere
la reĝo kaj ĉiuj Izraelidoj inaŭguris la domon de la
Eternulo. 64 En tiu tago la reĝo sanktigis la mezon de
la korto, kiu estis antaŭ la domo de la Eternulo; ĉar li
faris tie la bruloferon kaj la farunoferon kaj alportis
ofere la sebon de la pacoferoj; ĉar la kupra altaro, kiu
estis antaŭ la Eternulo, estis tro malgranda, por doni
lokon al la brulofero kaj la farunofero kaj la sebo de la
pacoferoj. 65 Kaj Salomono faris tiam feston, kaj kun
li la tuta Izrael, tre granda anaro, kiu kunvenis de
Ĥamat ĝis la torento de Egiptujo, antaŭ la Eternulo,
nia Dio, dum sep tagoj kaj ankoraŭ sep tagoj, kune dek
kvar tagoj. 66 En la oka tago li forsendis la popolon;
kaj ili benis la reĝon, kaj iris al siaj tendoj, gajaj kaj
ĝojantaj pro la tuta bono, kiun la Eternulo faris al Sia
servanto David kaj al Sia popolo Izrael.

9 Kiam Salomono finis la konstruadon de la domo
de la Eternulo kaj de la reĝa domo, kaj de ĉio
dezirita de Salomono, kion li deziris fari, 2 la Eternulo
aperis al Salomono duan fojon, kiel Li aperis al li en
Gibeon. 3 Kaj la Eternulo diris al li: Mi aŭdis vian
preĝon kaj vian petegon, kiun vi faris antaŭ Mi; Mi
sanktigis ĉi tiun domon, kiun vi konstruis, por ke Mi
metu tien Mian nomon por eterne; kaj Miaj okuloj
kaj Mia koro estos tie ĉiam. 4 Kaj pri vi, se vi irados
antaŭ Mi tiel, kiel iradis via patro David, kun pura
koro kaj ĝusteco, farante ĉion, kion Mi ordonis al vi,
kaj observante Miajn leĝojn kaj regulojn: 5 tiam Mi
fortikigos la tronon de via reĝado super Izrael por
eterne, kiel Mi promesis al via patro David, dirante:
Ne mankos ĉe vi viro sur la trono de Izrael. 6 Sed se
vi kaj viaj filoj deturnos vin de Mi, kaj ne observos
Miajn ordonojn kaj Miajn leĝojn, kiujn Mi donis al vi,
kaj vi iros kaj servos al aliaj dioj kaj adorkliniĝos al
ili: 7 tiam Mi ekstermos Izraelon de la lando, kiun Mi
donis al li; kaj ĉi tiun domon, kiun Mi sanktigis por
Mia nomo, Mi forpuŝos de antaŭ Mia vizaĝo; kaj Izrael
fariĝos proverbo kaj moko inter ĉiuj popoloj. 8 Kaj
pri ĉi tiu domo, kiu estas tre alta, ĉiu preteriranto
miregos kaj fajfos; kaj oni diros: Pro kio la Eternulo
agis tiele kun ĉi tiu lando kaj kun ĉi tiu domo? 9 Kaj
oni respondos: Pro tio, ke ili forlasis la Eternulon,
ilian Dion, kiu elkondukis iliajn patrojn el la lando
Egipta, kaj ili aliĝis al aliaj dioj kaj adorkliniĝis al ili
kaj servis al ili — pro tio la Eternulo venigis sur ilin ĉi
tiun tutan malbonon. 10 Post paso de la dudek jaroj,
dum kiuj Salomono konstruis la du domojn, la domon

de la Eternulo kaj la reĝan domon 11 (por kiuj Ĥiram,
la reĝo de Tiro, liveris al Salomono cedrajn arbojn
kaj cipresajn arbojn kaj oron laŭ lia tuta deziro), la
reĝo Salomono tiam donis al Ĥiram dudek urbojn
en la lando Galilea. 12 Kaj Ĥiram eliris el Tiro, por
rigardi la urbojn, kiujn donis al li Salomono; kaj ili
ne plaĉis al li. 13 Kaj li diris: Kio estas tiuj urboj,
kiujn vi donis al mi, mia frato? Kaj li donis al ili la
nomon lando Kabul ĝis la nuna tago. 14 Kaj Ĥiram
sendis al la reĝo cent dudek kikarojn da oro. 15 Jen
estas la aranĝo pri la impostoj, kiujn starigis la reĝo
Salomono, por konstrui la domon de la Eternulo kaj
sian domon kaj Milon kaj la muregon de Jerusalem
kaj Ĥacoron kaj Megidon kaj Gezeron. 16 (Faraono,
reĝo de Egiptujo, venis kaj venkoprenis Gezeron kaj
forbruligis ĝin per fajro, kaj mortigis la Kanaanidojn,
kiuj loĝis en la urbo, kaj li donis ĝin kiel donacon
al sia filino, edzino de Salomono.) 17 Kaj Salomono
konstruis Gezeron, kaj la malsupran Bet-Ĥoronon,
18 kaj Baalaton, kaj Tadmoron en la dezerto, en la
lando, 19 kaj ĉiujn urbojn de provizoj, kiujn Salomono
havis, kaj la urbojn por la ĉaroj kaj la urbojn por la
rajdistoj, kaj ĉion, kion Salomono deziris konstrui en
Jerusalem kaj sur Lebanon kaj en la tuta lando de sia
regado. 20 Koncerne la tutan popolon, kiu restis el la
Amoridoj, Ĥetidoj, Perizidoj, Ĥividoj, kaj Jebusidoj,
kiuj ne estis el la idoj de Izrael: 21 iliajn infanojn, kiuj
restis post ili en la lando kaj kiujn la Izraelidoj ne
povis ekstermi, Salomono faris tributuloj-laboristoj
ĝis la nuna tago. 22 Sed el la Izraelidoj Salomono
ne faris laboristojn; ili estis militistoj, liaj servantoj,
liaj eminentuloj, liaj militestroj, liaj ĉarestroj, kaj liaj
rajdistoj. 23 La nombro de la ĉefaj oficistoj super
la laboroj de Salomono estis kvincent kvindek; ili
regis la popolon, kiu faris la laborojn. 24 La filino de
Faraono transiris el la urbo de David en sian domon,
kiun li konstruis por ŝi; tiam li konstruis Milon. 25
Kaj Salomono alportadis tri fojojn en jaro bruloferojn
kaj pacoferojn sur la altaron, kiun li konstruis al la
Eternulo, kaj incensadis ĉe ĝi antaŭ la Eternulo. Kaj li
finkonstruis la domon. 26 Kaj ŝiparon faris la reĝo
Salomono en Ecjon-Geber, kiu troviĝas apud Elat, sur
la bordo de la Ruĝa Maro, en la lando de Edom. 27 Kaj
Ĥiram sendis en la ŝiparo siajn servantojn ŝipistojn,
spertajn maristojn, kun la servantoj de Salomono. 28
Kaj ili venis Ofiron, kaj prenis de tie kvarcent dudek
kikarojn da oro kaj venigis al la reĝo Salomono.

10 Kiam la reĝino de Ŝeba aŭdis la famon pri
Salomono kaj pri la domo de la Eternulo, ŝi
venis, por elprovi lin per enigmoj. 2 Kaj ŝi venis
Jerusalemon kun tre granda akompanantaro, kun
kameloj, portantaj aromaĵojn, tre multe da oro, kaj
multekostajn ŝtonojn. Kaj ŝi venis al Salomono, kaj
parolis kun li pri ĉio, kion ŝi havis en sia koro. 3 Kaj
Salomono solvis al ŝi ĉiujn ŝiajn demandojn; kaj estis
nenio, kion la reĝo ne scius kaj kion li ne solvus al
ŝi. 4 Kaj la reĝino de Ŝeba vidis la tutan saĝecon de
Salomono, kaj la domon, kiun li konstruis, 5 kaj la
manĝaĵon ĉe lia tablo kaj la loĝejon de liaj sklavoj kaj
la oficojn de liaj servantoj kaj iliajn vestojn kaj liajn
vinverŝistojn, kaj liajn bruloferojn, kiujn li oferadis en
la domo de la Eternulo; kaj ŝi estis tute ravita. 6 Kaj ŝi
diris al la reĝo: Vera estas tio, kion mi aŭdis en mia
lando pri viaj aferoj kaj pri via saĝeco; 7 mi ne kredis
al la diroj, ĝis mi venis kaj ĝis miaj okuloj ekvidis; sed
nun mi vidas, ke oni ne rakontis al mi eĉ duonon;
vi havas pli da saĝo kaj bono, ol diras la famo, kiun
mi aŭdis. 8 Feliĉaj estas viaj homoj, feliĉaj estas viaj
servantoj, kiuj ĉiam staras antaŭ vi kaj aŭdas vian
saĝecon. 9 Benata estu la Eternulo, via Dio, kiu favoras
vin kaj sidigis vin sur la tronon de Izrael. Pro Sia
eterna amo al Izrael Li faris vin reĝo, por ke vi zorgu
pri juĝo kaj justeco. 10 Kaj ŝi donacis al la reĝo cent
dudek kikarojn da oro kaj tre multe da aromaĵoj kaj
multekostajn ŝtonojn; neniam plu venis tiom multe
da aromaĵoj, kiom la reĝino de Ŝeba donacis al la reĝo
Salomono. 11 Kaj la ŝiparo de Ĥiram, kiu venigis oron
el Ofir, alvenigis el Ofir tre multe da santala ligno kaj
multekostajn ŝtonojn. 12 Kaj el la santala ligno la reĝo
faris pilastrojn por la domo de la Eternulo kaj por
la reĝa domo, ankaŭ harpojn kaj psalterojn por la
kantistoj; neniam venis tiom da santala ligno, nek
estis vidata, ĝis la nuna tago. 13 Kaj la reĝo Salomono
donis al la reĝino de Ŝeba ĉion, kion ŝi deziris kaj
kion ŝi petis, krom tio, kion li donis al ŝi el la mano
de la reĝo Salomono mem. Kaj ŝi foriris returne en
sian landon, ŝi kaj ŝiaj servantoj. 14 La pezo de la oro,
kiu estis alportita al Salomono dum unu jaro, estis
sescent sesdek ses kikaroj da oro; 15 krom tio, kio
venis de la butikistoj kaj de la komerco de negocistoj
kaj de ĉiuj reĝoj de Arabujo kaj de la regionestroj. 16
Kaj la reĝo Salomono faris ducent grandajn ŝildojn el
forĝita oro (sescent sikloj da oro estis uzitaj por ĉiu
ŝildo) 17 kaj tricent malgrandajn ŝildojn el forĝita oro

(tri min'oj da oro estis uzitaj por ĉiu el tiuj ŝildoj); kaj
la reĝo metis ilin en la arbardomon de Lebanon. 18
Kaj la reĝo faris grandan tronon el eburo kaj tegis ĝin
per pura oro. 19 Ses ŝtupojn havis la trono, rondan
supron havis la trono malantaŭe, kaj brakapogojn
ambaŭflanke de la sidloko, kaj du leonojn, starantajn
apud la brakapogoj. 20 Kaj ankoraŭ dek du leonoj tie
staris sur la ses ŝtupoj ambaŭflanke; ne ekzistis io
simila en iu ajn regno. 21 Kaj ĉiuj trinkvazoj de la reĝo
Salomono estis el oro, kaj ĉiuj vazoj de la Lebanona
arbardomo estis el pura oro; nenio estis el arĝento; en
la tempo de Salomono ĝi estis rigardata kiel senvalora.
22 Ĉar Tarŝiŝan ŝiparon la reĝo havis sur la maro kun
la ŝiparo de Ĥiram; unu fojon en tri jaroj venadis la
Tarŝiŝa ŝiparo, alportante oron, arĝenton, eburon,
simiojn, kaj pavojn. 23 Tiel la reĝo Salomono superis
ĉiujn reĝojn de la tero per riĉeco kaj per saĝeco. 24
Kaj ĉiuj sur la tero penis vidi Salomonon, por aŭdi
lian saĝon, kiun Dio enmetis en lian koron. 25 Kaj ili
alportadis ĉiu sian donacon: vazojn arĝentajn, vazojn
orajn, vestojn, batalilojn, aromaĵojn, ĉevalojn, kaj
mulojn, ĉiujare. 26 Kaj Salomono kolektis al si ĉarojn
kaj rajdistojn; kaj li havis mil kvarcent ĉarojn kaj dek
du mil rajdistojn; kaj li lokis ilin en la urboj de ĉaroj
kaj ĉe la reĝo en Jerusalem. 27 Kaj la reĝo atingis
tion, ke la arĝento estis en Jerusalem kiel ŝtonoj, kaj
la cedroj estis en tiel granda kvanto, kiel sikomoroj
sur malaltaj lokoj. 28 La ĉevalojn al Salomono oni
venigadis el Egiptujo; kaj societo de komercistoj de la
reĝo aĉetadis ilin amase laŭ difinita prezo. 29 Ĉiu ĉaro
estis liverata el Egiptujo pro sescent sikloj da arĝento,
kaj ĉiu ĉevalo pro cent kvindek; tiel same ili estis
liverataj per iliaj manoj al ĉiuj reĝoj de la Ĥetidoj kaj
al la reĝoj de Sirio.

11 La reĝo Salomono amis multajn aligentajn
virinojn, la filinon de Faraono, Moabidinojn,
Amonidinojn, Edomidinojn, Cidonaninojn, Ĥetidinojn,
2 el tiuj popoloj, pri kiuj la Eternulo diris al la Izraelidoj:
Ne iru al ili, kaj ili ne iru al vi, ĉar ili turnos vian koron
al siaj dioj; al ili Salomono aliĝis per amo. 3 Kaj li havis
da ĉefaj edzinoj sepcent kaj da kromvirinoj tricent;
kaj liaj edzinoj forklinis lian koron. 4 En la tempo de
maljuneco de Salomono liaj edzinoj turnis lian koron
al aliaj dioj, kaj lia koro ne estis tiel plene fordonita al
la Eternulo, lia Dio, kiel la koro de lia patro David. 5
Kaj Salomono sekvis Aŝtaron, diaĵon de la Cidonanoj,
kaj Milkomon, abomenindaĵon de la Amonidoj. 6
Kaj Salomono faris malbonon antaŭ la okuloj de la
Eternulo, kaj ne sekvis plene la Eternulon, kiel lia
patro David. 7 Tiam Salomono konstruis altaĵon al
Kemoŝ, abomenindaĵo de la Moabidoj, sur la monto,
kiu estas antaŭ Jerusalem, kaj al Moleĥ, abomenindaĵo
de la Amonidoj. 8 Kaj tiel li faris por ĉiuj siaj aligentaj
edzinoj, kiuj incensadis kaj alportadis oferojn al siaj
dioj. 9 Kaj la Eternulo ekkoleris Salomonon pro tio, ke
li forklinis sian koron de la Eternulo, Dio de Izrael, kiu
aperis al li du fojojn, 10 kaj kiu ordonis al li pri tiu
afero, ke li ne sekvu aliajn diojn; sed li ne observis
tion, kion la Eternulo ordonis. 11 Kaj la Eternulo diris
al Salomono: Pro tio, ke ĉi tio fariĝis ĉe vi, kaj ke vi ne
observis Mian interligon kaj Miajn leĝojn, kiujn Mi
donis al vi, Mi forŝiros de vi la regnon kaj donos ĝin al
via servanto. 12 Tamen dum via vivo Mi tion ne faros,
pro via patro David; el la manoj de via filo Mi ĝin
forŝiros. 13 Sed ne la tutan regnon Mi forŝiros; unu
tribon Mi donos al via filo, pro Mia servanto David,
kaj pro Jerusalem, kiun Mi elektis. 14 Kaj la Eternulo
aperigis kontraŭulon kontraŭ Salomono, Hadadon, la
Edomidon, el la reĝa semo de Edom. 15 Kiam David
estis en Edomujo, kaj la militestro Joab venis, por
enterigi la mortigitojn, li mortigis ĉiujn virseksulojn
en Edomujo 16 (ĉar ses monatojn tie restis Joab kaj
ĉiuj Izraelidoj, ĝis ili ekstermis ĉiujn virseksulojn en
Edomujo); 17 tiam forkuris Hadad kune kun viroj
Edomidoj el la servantoj de lia patro, por iri Egiptujon;
Hadad estis tiam malgranda knabo. 18 Ili elmoviĝis el
Midjan kaj venis Paranon kaj prenis kun si homojn
el Paran, kaj venis Egiptujon al Faraono, reĝo de
Egiptujo, kaj ĉi tiu donis al li domon kaj nutraĵon, kaj
ankaŭ landon li donis al li. 19 Hadad tre ekplaĉis al
Faraono, kaj ĉi tiu donis al li kiel edzinon fratinon de
sia edzino, fratinon de la reĝino Taĥpenes. 20 Kaj la
fratino de Taĥpenes naskis al li lian filon Genubat.
Kaj Taĥpenes edukis lin en la domo de Faraono, kaj
Genubat loĝis en la domo de Faraono inter la filoj de
Faraono. 21 Kiam Hadad aŭdis en Egiptujo, ke David
ekdormis kun siaj patroj kaj ke la militestro Joab
mortis, Hadad diris al Faraono: Forliberigu min, ke
mi iru en mian landon. 22 Faraono diris al li: Ĉu io
mankas al vi ĉe mi, ke vi deziras iri en vian landon?
Kaj li respondis: Ne, tamen forliberigu min. 23 Dio
starigis kontraŭ li ankoraŭ kontraŭulon, Rezonon,
filon de Eljada, kiu forkuris de sia sinjoro Hadadezer,

reĝo de Coba. 24 Kaj li kolektis kontraŭ li virojn
kaj fariĝis estro de bando, kiam David ilin mortigis;
kaj ili iris Damaskon kaj ekloĝis tie kaj ekregis en
Damasko. 25 Kaj li estis kontraŭulo de la Izraelidoj
dum la tuta vivo de Salomono, krom la malbono, kiu
venadis de Hadad. Kaj li havis malamon kontraŭ la
Izraelidoj, kaj li fariĝis reĝo de Sirio. 26 Kaj Jerobeam,
filo de Nebat, Efratano el Cereda, kies patrino havis la
nomon Cerua kaj estis vidvino, servanto de Salomono,
levis la manon kontraŭ la reĝon. 27 Kaj jen estas la
kaŭzo, pro kiu li levis la manon kontraŭ la reĝon:
Salomono konstruis Milon; li riparis la breĉojn de
la urbo de sia patro David. 28 Jerobeam estis viro
forta kaj kuraĝa. Kiam Salomono vidis, ke la junulo
estas laborkapabla, li starigis lin administranto de la
tributlaboroj de la domo de Jozef. 29 En tiu tempo
okazis, ke Jerobeam eliris el Jerusalem; kaj renkontis
lin sur la vojo la profeto Aĥija, la Ŝiloano; li portis sur
si novan veston; ili ambaŭ estis solaj sur la kampo.
30 Kaj Aĥija prenis la novan veston, kiu estis sur li,
kaj disŝiris ĝin en dek du pecojn. 31 Kaj li diris al
Jerobeam: Prenu al vi dek pecojn; ĉar tiele diras la
Eternulo, Dio de Izrael: Jen Mi forŝiras la regnon el
la manoj de Salomono kaj donas al vi dek tribojn 32
(sed unu tribo restos ĉe li, pro Mia servanto David, kaj
pro la urbo Jerusalem, kiun Mi elektis el ĉiuj triboj de
Izrael); 33 pro tio, ke ili forlasis Min, kaj adorkliniĝis
al Aŝtar, diaĵo de la Cidonanoj, al Kemoŝ, dio de Moab,
kaj al Milkom, dio de la Amonidoj, kaj ne iris laŭ Miaj
vojoj, por plenumi tion, kio plaĉas al Mi, kaj Miajn
leĝojn kaj Miajn regulojn, kiel lia patro David. 34
Mi ne prenos la tutan regnon el liaj manoj, sed Mi
faros, ke li restos reganto dum sia tuta vivo, pro Mia
servanto David, kiun Mi elektis kaj kiu observis Miajn
ordonojn kaj Miajn leĝojn. 35 Sed Mi prenos la regnon
el la manoj de lia filo, kaj Mi donos el ĝi al vi dek
tribojn; 36 kaj al lia filo Mi donos unu tribon, por ke
restu lumilo por ĉiam al Mia servanto David antaŭ
Mi en Jerusalem, en la urbo, kiun Mi elektis al Mi,
por meti tien Mian nomon. 37 Vin Mi prenos, kaj vi
regos super ĉio, kion via animo deziros, kaj vi estos
reĝo super Izrael. 38 Kaj se vi obeos ĉion, kion Mi
ordonos al vi, kaj iros laŭ Miaj vojoj, kaj faros tion,
kio plaĉas al Mi, observante Miajn leĝojn kaj Miajn
ordonojn, kiel faris Mia servanto David, tiam Mi estos
kun vi, kaj konstruos al vi domon fidindan, kiel Mi
konstruis al David, kaj Mi donos al vi Izraelon. 39 Kaj
per tio Mi humiligos la semon de David, tamen ne por
ĉiam. 40 Salomono intencis mortigi Jerobeamon; sed
Jerobeam leviĝis kaj forkuris en Egiptujon, al Ŝiŝak,
reĝo de Egiptujo, kaj li restis en Egiptujo ĝis la morto
de Salomono. 41 La tuta cetera historio de Salomono,
kaj ĉio, kion li faris, kaj lia saĝeco estas priskribitaj en
la libro de kroniko de Salomono. 42 La tempo, dum
kiu Salomono reĝis en Jerusalem super la tuta Izrael,
estis kvardek jaroj. 43 Kaj Salomono ekdormis kun
siaj patroj kaj estis enterigita en la urbo de sia patro
David. Kaj anstataŭ li ekreĝis Reĥabeam, lia filo.

12 Reĥabeam iris en Ŝeĥemon, ĉar en Ŝeĥemon
venis ĉiuj Izraelidoj, por fari lin reĝo. 2 Kiam
tion aŭdis Jerobeam, filo de Nebat (ĉar li estis ankoraŭ
en Egiptujo, kien li forkuris de la reĝo Salomono,
kaj Jerobeam loĝis en Egiptujo, 3 sed oni sendis kaj
vokis lin), tiam Jerobeam kaj la tuta komunumo de
Izrael venis, kaj ekparolis al Reĥabeam, dirante: 4 Via
patro tro pezigis nian jugon; nun deprenu iom de la
malfacilaj laboroj de via patro, kaj de lia peza jugo,
kiun li metis sur nin, kaj tiam ni servados al vi. 5 Kaj
li diris al ili: Iru, kaj post tri tagoj revenu al mi. Kaj la
popolo disiris. 6 Kaj la reĝo Reĥabeam konsiliĝis kun
la maljunuloj, kiuj staradis antaŭ lia patro Salomono
dum lia vivo, kaj li diris: Kiel vi konsilas respondi al
ĉi tiu popolo? 7 Kaj ili diris al li jene: Se hodiaŭ vi
estos servanto al ĉi tiu popolo kaj komplezos al ili kaj
kontentigos ilin kaj parolos al ili bonajn vortojn, ili
estos al vi servantoj por ĉiam. 8 Sed li ne atentis la
konsilon de la maljunuloj, kiun ili donis al li, kaj li
konsiliĝis kun la junuloj, kiuj elkreskis kune kun li kaj
staris antaŭ li. 9 Kaj li diris al ili: Kion vi konsilas, ke
ni respondu al ĉi tiu popolo, kiu diris al mi jene: Faru
malpli peza la jugon, kiun via patro metis sur nin? 10
Kaj la junuloj, kiuj elkreskis kune kun li, parolis al
li, dirante: Tiele diru al ĉi tiu popolo, kiu diris al vi:
Via patro faris nian jugon tro peza, kaj vi faru ĝin
malpli peza — tiele diru al ili: Mia malgranda fingro
estas pli dika, ol la lumboj de mia patro; 11 tial se mia
patro ŝarĝis vin per peza jugo, mi ankoraŭ plipezigos
vian jugon; mia patro vin punadis per vipoj, sed mi
vin punados per skorpioj. 12 Kaj Jerobeam kaj la tuta
popolo venis al Reĥabeam en la tria tago, kiel la reĝo
ordonis, dirante: Revenu al mi en la tria tago. 13 Kaj la
reĝo respondis al la popolo malafable, kaj ne atentis
la konsilon de la maljunuloj, kiun ili donis; 14 kaj

li parolis al ili laŭ la konsilo de la junuloj, dirante:
Mia patro pezigis vian jugon, sed mi ankoraŭ pli
pezigos vian jugon; mia patro vin punadis per vipoj,
sed mi vin punados per skorpioj. 15 Kaj la reĝo ne
aŭskultis la popolon; ĉar estis destinite de la Eternulo,
por ke plenumiĝu Lia vorto, kiun la Eternulo diris
per Aĥija, la Ŝiloano, al Jerobeam, filo de Nebat. 16
Kiam ĉiuj Izraelidoj vidis, ke la reĝo ilin ne obeas,
tiam la popolo respondis al la reĝo, dirante: Kian
parton ni havas en David? ni ne havas heredaĵon en
la filo de Jiŝaj. Al viaj tendoj, ho Izrael! nun zorgu
mem pri via domo, ho David! Kaj la Izraelidoj disiris
al siaj tendoj. 17 Sed super la Izraelidoj, kiuj loĝis
en la urboj de Judujo, reĝis Reĥabeam. 18 Kaj la
reĝo Reĥabeam sendis Adoramon, la estron super
la impostoj; sed ĉiuj Izraelidoj ĵetis sur lin ŝtonojn,
kaj li mortis. Kaj la reĝo Reĥabeam rapide sidiĝis
en ĉaro, por forkuri en Jerusalemon. 19 Tiamaniere
Izrael defalis de la domo de David ĝis la nuna tago.
20 Kiam ĉiuj Izraelidoj aŭdis, ke Jerobeam revenis,
ili sendis kaj vokis lin al la kunveno kaj faris lin
reĝo super ĉiuj Izraelidoj. La domon de David sekvis
sole nur la tribo de Jehuda. 21 Kaj kiam Reĥabeam
venis en Jerusalemon, li kolektis el la tuta domo de
Jehuda kaj el la tribo de Benjamen cent okdek mil
elektitajn militistojn, por militi kontraŭ la domo de
Izrael, por revenigi la regnon al Reĥabeam, filo de
Salomono. 22 Sed aperis vorto de Dio al Ŝemaja, homo
de Dio, dirante: 23 Diru al Reĥabeam, filo de Salomono,
reĝo de Judujo, kaj al la tuta domo de Jehuda kaj de
Benjamen kaj al la cetera popolo jene: 24 Tiele diras la
Eternulo: Ne iru kaj ne militu kontraŭ viaj fratoj, la
Izraelidoj; reiru ĉiu al sia domo, ĉar de Mi estas farita
ĉi tiu afero. Kaj ili obeis la vorton de la Eternulo,
kaj retenis sin de irado, konforme al la vorto de la
Eternulo. 25 Kaj Jerobeam prikonstruis Ŝeĥemon sur
la monto de Efraim kaj ekloĝis en ĝi; kaj li eliris el tie
kaj konstruis Penuelon. 26 Kaj Jerobeam diris en sia
koro: Nun la regno povas reveni al la domo de David;
27 se ĉi tiu popolo irados, por fari oferojn en la domo
de la Eternulo en Jerusalem, tiam la koro de ĉi tiu
popolo returniĝos al ilia sinjoro, al Reĥabeam, reĝo de
Judujo; kaj ili mortigos min kaj revenos al Reĥabeam,
reĝo de Judujo. 28 Kaj la reĝo aranĝis konsiliĝon, kaj li
faris du orajn bovidojn, kaj diris al la popolo: Ne iradu
plu en Jerusalemon; jen estas viaj dioj, ho Izrael, kiuj
elkondukis vin el la lando Egipta. 29 Kaj li starigis unu
en Bet-El, kaj la duan li instalis en Dan. 30 Kaj ĉi tiu
afero fariĝis kaŭzo de pekado: la popolo komencis
iradi al unu el ili ĝis Dan. 31 Kaj li konstruis domojn
de altaĵoj, kaj li starigis pastrojn el la popolo, kiuj ne
estis el la idoj de Levi. 32 Kaj Jerobeam starigis feston
en la oka monato, en la dek-kvina tago de la monato,
simile al la festo en Judujo, kaj li suriris sur la altaron;
tiel li faris en Bet-El, alportante oferojn al la bovidoj,
kiujn li faris; kaj li loĝigis en Bet-El la pastrojn de la
altaĵoj, kiujn li aranĝis. 33 Kaj li suriris sur la altaron,
kiun li faris en Bet-El, en la dek-kvina tago de la oka
monato, kiun li mem elpensis; kaj li faris feston por la
Izraelidoj, kaj suriris sur la altaron, por incensi.

13 Kaj jen homo de Dio venis el Judujo laŭ ordono
de la Eternulo en Bet-Elon, kiam Jerobeam staris
sur la altaro, por incensi. 2 Kaj li vokis al la altaro laŭ
ordono de la Eternulo kaj diris: Ho altaro, altaro! tiele
diras la Eternulo: Jen en la domo de David naskiĝos
filo, kies nomo estos Joŝija, kaj li buĉos sur vi la
pastrojn de la altaĵoj, incensantajn sur vi, kaj homaj
ostoj estos bruligitaj sur vi. 3 Kaj li donis en tiu tago
signon, dirante: Ĉi tio estas la signo, ke tion parolis la
Eternulo: jen la altaro disfendiĝos, kaj la cindro, kiu
estas sur ĝi, disŝutiĝos. 4 Kiam la reĝo aŭdis la vortojn
de la homo de Dio, kiujn li vokis al la altaro en Bet-
El, Jerobeam etendis sian manon de sur la altaro, kaj
diris: Kaptu lin! Sed rigidiĝis lia mano, kiun li etendis
kontraŭ lin, kaj li ne povis retiri ĝin al si. 5 Kaj la
altaro disfendiĝis, kaj la cindro de la altaro disŝutiĝis,
konforme al la signo, kiun donis la homo de Dio laŭ la
ordono de la Eternulo. 6 Kaj la reĝo ekparolis kaj diris
al la homo de Dio: Faru peton antaŭ la Eternulo, via
Dio, kaj preĝu por mi, por ke mia mano revenu al mi.
Kaj la homo de Dio faris peton antaŭ la Eternulo, kaj
la mano de la reĝo revenis al li kaj fariĝis kiel antaŭe.
7 Tiam la reĝo diris al la homo de Dio: Iru kun mi en la
domon kaj fortigu vin per manĝo, kaj mi donos al vi
donacon. 8 Sed la homo de Dio diris al la reĝo: Eĉ se
vi donos al mi duonon de via domo, mi ne iros kun vi,
kaj mi ne manĝos panon nek trinkos akvon en ĉi tiu
loko; 9 ĉar tiele estas ordonite al mi per la vorto de
la Eternulo: Ne manĝu panon nek trinku akvon, kaj
ne reiru laŭ la vojo, laŭ kiu vi venis. 10 Kaj li iris laŭ
alia vojo, kaj ne reiris laŭ la vojo, laŭ kiu li venis en
Bet-Elon. 11 Unu profeto maljunulo loĝis en Bet-El.
Kaj venis liaj filoj, kaj rakontis al li la tutan aferon,

kiun faris la homo de Dio hodiaŭ en Bet-El; la vortojn,
kiujn li diris al la reĝo, ili rakontis al sia patro. 12
Kaj ilia patro diris al ili: Laŭ kiu vojo li iris? Kaj liaj
filoj montris la vojon, laŭ kiu iris la homo de Dio, kiu
venis el Judujo. 13 Tiam li diris al siaj filoj: Selu al mi
la azenon. Kaj ili selis al li la azenon, kaj li ekrajdis
sur ĝi, 14 kaj sekvis la homon de Dio kaj trovis lin
sidanta sub kverko, kaj diris al li: Ĉu vi estas la homo
de Dio, kiu venis el Judujo? Kaj tiu diris: Mi. 15 Kaj
li diris al li: Venu kun mi en la domon kaj manĝu
panon. 16 Sed tiu diris: Mi ne povas reiri kun vi kaj
veni al vi, kaj mi ne manĝos panon nek trinkos ĉe
vi akvon en ĉi tiu loko; 17 ĉar estas dirite al mi per
la vorto de la Eternulo: Ne manĝu panon nek trinku
tie akvon, ne reiru laŭ la vojo, laŭ kiu vi venis. 18
Kaj li diris al li: Mi ankaŭ estas profeto, kiel vi, kaj
anĝelo diris al mi laŭ ordono de la Eternulo jene:
Revenigu lin kun vi en vian domon, por ke li manĝu
panon kaj trinku akvon. Li mensogis al li. 19 Kaj li
reiris kun li kaj manĝis panon en lia domo kaj trinkis
akvon. 20 Dum ili sidis ankoraŭ ĉe la tablo, venis la
vorto de la Eternulo al la profeto, kiu lin revenigis.
21 Kaj li vokis al la homo de Dio, kiu venis el Judujo,
dirante: Tiele diras la Eternulo: Pro tio, ke vi malobeis
la buŝon de la Eternulo, kaj ne plenumis la ordonon,
kiun faris al vi la Eternulo, via Dio, 22 sed vi reiris kaj
manĝis panon kaj trinkis akvon en la loko, pri kiu
Li diris al vi, ke vi ne manĝu panon kaj ne trinku
akvon, via kadavro ne venos en la tombon de viaj
patroj. 23 Post kiam li manĝis panon kaj trinkis, oni
selis por li la azenon, por la profeto, kiun li revenigis.
24 Kaj li iris, kaj sur la vojo renkontis lin leono kaj
mortigis lin. Kaj lia kadavro kuŝis ĵetita sur la vojo,
kaj la azeno staris apude, kaj la leono staris apud la
kadavro. 25 Kaj jen pasis homoj, kaj vidis la kadavron
kuŝantan sur la vojo, kaj la leonon starantan apud la
kadavro, kaj ili iris kaj rakontis en la urbo, en kiu loĝis
la maljuna profeto. 26 Kiam tion aŭdis la profeto, kiu
revenigis lin de la vojo, li diris: Tio estas la homo de
Dio, kiu malobeis la buŝon de la Eternulo; la Eternulo
transdonis lin al leono, kiu disŝiris kaj mortigis lin
konforme al la vorto de la Eternulo, kiun Li diris al li.
27 Kaj li diris al siaj filoj jene: Selu al mi la azenon. Kaj
ili selis. 28 Kaj li iris kaj trovis lian kadavron kuŝantan
sur la vojo, kaj la azenon kaj la leonon starantajn apud
la kadavro; la leono ne manĝis la kadavron kaj ne
disŝiris la azenon. 29 Kaj la profeto levis la kadavron
de la homo de Dio kaj metis ĝin sur la azenon kaj
veturigis ĝin returne. Kaj la maljuna profeto venis en
la urbon, por priplori kaj enterigi lin. 30 Kaj li metis
lian kadavron en sian tombon; kaj ili priploris lin: Ho
ve, mia frato! 31 Post kiam oni enterigis lin, li diris al
siaj filoj jene: Kiam mi mortos, entombigu min en la
tombo, en kiu estas entombigita la homo de Dio; apud
liajn ostojn metu miajn ostojn. 32 Ĉar plenumiĝos la
vorto, kiun li eldiris laŭ ordono de la Eternulo pri
la altaro, kiu estas en Bet-El, kaj pri ĉiuj domoj de
altaĵoj, kiuj troviĝas en la urboj de Samario. 33 Post
tiu okazintaĵo Jerobeam ne retiris sin de sia malbona
vojo, sed li denove starigis el la popolo pastrojn por
la altaĵoj; kiun li volis, tiun li konsekris, ke li fariĝu
pastro de altaĵoj. 34 Kaj ĉi tio fariĝis peko por la domo
de Jerobeam, por pereo kaj ekstermiĝo de sur la tero.

**14** En tiu tempo malsaniĝis Abija, filo de Jerobeam.
2 Kaj Jerobeam diris al sia edzino: Leviĝu kaj
aliaspektiĝu, por ke oni ne sciu, ke vi estas edzino
de Jerobeam, kaj iru en Ŝilon; tie troviĝas la profeto
Aĥija, kiu antaŭdiris al mi, ke mi estos reĝo super ĉi
tiu popolo. 3 Kaj prenu en vian manon dek panojn
kaj biskvitojn kaj kruĉon da mielo, kaj iru al li; li
diros al vi, kio estos al la knabo. 4 Kaj la edzino de
Jerobeam tiel faris; ŝi leviĝis kaj iris en Ŝilon kaj venis
en la domon de Aĥija. Aĥija ne povis vidi, ĉar liaj
okuloj ĉesis funkcii pro maljuneco. 5 Sed la Eternulo
diris al Aĥija: Jen la edzino de Jerobeam iras, por
demandi vin pri sia filo, ĉar li estas malsana; tiel kaj
tiel diru al ŝi; kiam ŝi venos, ŝi prezentos sin kiel alian
personon. 6 Kaj kiam Aĥija ekaŭdis la sonadon de
ŝiaj piedoj, kiam ŝi eniris en la pordon, li diris: Eniru,
edzino de Jerobeam; por kio vi prezentas vin kiel alian
personon? mi estas sendita al vi kun sciigo premanta.
7 Iru, diru al Jerobeam: Tiele diras la Eternulo, Dio
de Izrael: Ĉar Mi altigis vin el inter la popolo kaj
faris vin princo super Mia popolo Izrael, 8 kaj Mi
forŝiris la regnon de la domo de David kaj donis ĝin
al vi; sed vi ne estis kiel Mia servanto David, kiu
observis Miajn ordonojn kaj sekvis Min per sia tuta
koro, farante nur tion, kio plaĉas al Mi; 9 kaj vi agis
pli malbone, ol ĉiuj, kiuj estis antaŭ vi, kaj vi iris
kaj faris al vi aliajn diojn kaj idolojn, por kolerigi
Min, kaj Min vi ĵetis malantaŭ vian dorson: 10 tial Mi
venigos malbonon sur la domon de Jerobeam, kaj Mi
ekstermos ĉe Jerobeam ĉiun virseksulon, malliberulon

kaj liberulon en Izrael, kaj Mi elbalaos la domon de
Jerobeam, kiel on elbalaas malpuraĵon, ĉion ĝis la
fino. 11 Kiu mortos ĉe Jerobeam en la urbo, tiun
formanĝos la hundoj, kaj kiu mortos sur la kampo,
tiun formanĝos la birdoj de la ĉielo; ĉar la Eternulo
tion diris. 12 Kaj vi leviĝu, iru al via domo; kiam via
piedo eniros en la urbon, la infano mortos. 13 Kaj
priploros lin ĉiuj Izraelidoj kaj enterigos lin; ĉar li sola
ĉe Jerobeam iros en tombon, ĉar en li el la tuta domo
de Jerobeam troviĝis io bona koncerne la Eternulon,
Dion de Izrael. 14 Kaj la Eternulo starigos al Si super
Izrael reĝon, kiu ekstermos la domon de Jerobeam en
tiu tago kaj baldaŭ. 15 Kaj la Eternulo frapos Izraelon,
similigante lin al kano, kiu ŝanceliĝas en la akvo, kaj
Li elŝiros la Izraelidojn el tiu bona tero, kiun Li donis
al iliaj patroj, kaj Li disblovos ilin trans la Riveron pro
tio, ke ili faris siajn sanktajn stangojn, kolerigante
la Eternulon. 16 Kaj Li transdonos Izraelon pro la
pekoj de Jerobeam, per kiuj li pekis kaj per kiuj li
pekigis Izraelon. 17 Kaj leviĝis la edzino de Jerobeam
kaj foriris kaj venis en Tircan. Apenaŭ ŝi paŝis sur la
sojlon de la domo, la knabo mortis. 18 Kaj oni enterigis
lin, kaj ĉiuj Izraelidoj priploris lin, konforme al la
vorto de la Eternulo, kiun Li diris per Sia servanto, la
profeto Aĥija. 19 La cetera historio de Jerobeam, kiel
li militis kaj kiel li reĝis, estas priskribita en la libro
de kroniko de la reĝoj de Izrael. 20 La tempo, dum kiu
reĝis Jerobeam, estis dudek du jaroj. Kaj li ekdormis
kun siaj patroj. Kaj anstataŭ li ekreĝis lia filo Nadab. 21
Reĥabeam, filo de Salomono, reĝis en Judujo. La aĝon
de kvardek unu jaroj havis Reĥabeam, kiam li fariĝis
reĝo; kaj dek sep jarojn li reĝis en Jerusalem, la urbo,
kiun la Eternulo elektis inter ĉiuj triboj de Izrael, por
estigi tie Sian nomon. La nomo de lia patrino estis
Naama, la Amonidino. 22 Kaj la Judoj faris malbonon
antaŭ la okuloj de la Eternulo, kaj incitis Lin pli ol ĉio,
kion faris iliaj patroj per siaj pekoj, kiujn ili pekis.
23 Kaj ankaŭ ili konstruis al si altaĵojn, statuojn, kaj
sanktajn stangojn sur ĉiu alta monteto kaj sub ĉiu
branĉoriĉa arbo. 24 Ankaŭ malĉastistoj estis en la
lando; ili faris ĉiujn abomenindaĵojn de la popoloj,
kiujn la Eternulo forpelis antaŭ la Izraelidoj. 25 En la
kvina jaro de la reĝo Reĥabeam iris Ŝiŝak, reĝo de
Egiptujo, kontraŭ Jerusalemon. 26 Kaj li forprenis la
trezorojn de la domo de la Eternulo kaj la trezorojn de
la reĝa domo, ĉion li prenis; li prenis ankaŭ ĉiujn orajn
ŝildojn, kiujn faris Salomono. 27 Kaj la reĝo Reĥabeam
faris anstataŭ ili ŝildojn kuprajn, kaj transdonis ilin en
la manojn de la estroj de korpogardistoj, kiuj gardadis
la enirejon de la reĝa domo. 28 Kaj ĉiufoje, kiam la reĝo
iris en la domon de la Eternulo, la korpogardistoj ilin
portis, kaj poste returne portis ilin en la ĉambron de
la korpogardistoj. 29 La cetera historio de Reĥabeam,
kaj ĉio, kion li faris, estas priskribitaj en la libro de
kroniko de la reĝoj de Judujo. 30 Kaj inter Reĥabeam
kaj Jerobeam estis milito dum ilia tuta vivo. 31 Kaj
Reĥabeam ekdormis kun siaj patroj, kaj oni enterigis
lin kun liaj patroj en la urbo de David. La nomo de
lia patrino estis Naama, Amonidino. Kaj anstataŭ li
ekreĝis lia filo Abijam.

**15** En la dek-oka jaro de la reĝo Jerobeam, filo de
Nebat, ekreĝis Abijam super Judujo. 2 Tri jarojn
li reĝis en Jerusalem. La nomo de lia patrino estis
Maaĥa, filino de Abiŝalom. 3 Li iradis en ĉiuj pekoj de
sia patro, kiujn ĉi tiu faris antaŭ li; kaj lia koro ne estis
plene fordonita al la Eternulo, lia Dio, kiel la koro de
lia patro David. 4 Sed pro David la Eternulo, lia Dio,
donis al li lumilon en Jerusalem, starigante lian filon
post li kaj subtenante Jerusalemon; 5 pro tio, ke David
faradis tion, kio plaĉas al la Eternulo, kaj dum sia
tuta vivo ne forkliniĝis de ĉio, kion Li ordonis al li,
krom la afero kun Urija, la Ĥetido. 6 Kaj milito estis
inter Reĥabeam kaj Jerobeam dum lia tuta vivo. 7 La
cetera historio de Abijam, kaj ĉio, kion li faris, estas
priskribitaj en la libro de kroniko de la reĝoj de Judujo.
Kaj milito estis inter Abijam kaj Jerobeam. 8 Kaj
Abijam ekdormis kun siaj patroj, kaj oni enterigis lin
en la urbo de David. Kaj anstataŭ li ekreĝis lia filo Asa.
9 En la dudeka jaro de la reĝado de Jerobeam super
Izrael ekreĝis Asa super Judujo. 10 Kaj kvardek unu
jarojn li reĝis en Jerusalem. La nomo de lia patrino
estis Maaĥa, filino de Abiŝalom. 11 Kaj Asa agadis,
kiel plaĉas al la Eternulo, kiel lia patro David. 12 Kaj li
elpelis la malĉastistojn el la lando, kaj forigis ĉiujn
idolojn, kiujn faris liaj patroj. 13 Kaj eĉ sian patrinon
Maaĥa li senigis je ŝia titolo de reĝino, pro tio, ke ŝi
faris idolon por Aŝtar. Kaj Asa dishakis ŝian idolon kaj
forbruligis ĉe la torento Kidron. 14 Tamen la altaĵoj ne
estis forigitaj; sed la koro de Asa estis perfekta ĉe la
Eternulo dum lia tuta vivo. 15 Li enportis en la domon
de la Eternulo la konsekritaĵojn de sia patro kaj siajn
proprajn konsekritaĵojn, arĝenton kaj oron kaj vazojn.
16 Kaj milito estis inter Asa kaj Baaŝa, reĝo de Izrael,

dum ilia tuta vivo. 17 Kaj Baaŝa, reĝo de Izrael, iris
kontraŭ Judujon, kaj li konstruis Raman, por bari la
eliradon kaj eniradon al Asa, reĝo de Judujo. 18 Tiam
Asa prenis la tutan arĝenton kaj oron, kiu restis en la
trezorejo de la domo de la Eternulo kaj en la trezorejo
de la reĝa domo, kaj donis tion en la manojn de siaj
servantoj; kaj la reĝo Asa sendis ilin al Ben-Hadad, filo
de Tabrimon, filo de Ĥezjon, reĝo de Sirio, kiu loĝis en
Damasko, kaj dirigis al li: 19 Estas interligo inter mi
kaj vi, inter mia patro kaj via patro; jen mi sendas al vi
donacon, arĝenton kaj oron; neniigu vian interligon
kun Baaŝa, reĝo de Izrael, por ke li foriru de mi. 20
Kaj Ben-Hadad obeis la reĝon Asa, kaj sendis siajn
militestrojn kontraŭ la urbojn de Izrael kaj venkobatis
Ijonon kaj Danon kaj Abel-Bet-Maaĥan kaj la tutan
Kineroton, la tutan landon de Naftali. 21 Kiam Baaŝa
tion aŭdis, li ĉesis konstrui Raman kaj restis en Tirca.
22 Tiam la reĝo Asa kunvokis ĉiujn Judojn, sen escepto;
kaj ili forportis la ŝtonojn de Rama kaj ĝian lignon,
el kiuj Baaŝa faris la konstruadon; kaj la reĝo Asa
konstruis el tio Geban de Benjamen kaj Micpan. 23 La
cetera historio de Asa, kaj lia heroeco, kaj ĉio, kion li
faris, kaj la urboj, kiujn li konstruis, estas priskribitaj
en la libro de kroniko de la reĝoj de Judujo. Nur en
sia maljuneco li malsaniĝis je siaj piedoj. 24 Kaj Asa
ekdormis kun siaj patroj, kaj oni enterigis lin kun liaj
patroj en la urbo de lia patro David. Kaj anstataŭ li
ekreĝis lia filo Jehoŝafat. 25 Nadab, filo de Jerobeam,
fariĝis reĝo super Izrael en la dua jaro de Asa, reĝo
de Judujo; kaj li reĝis super Izrael du jarojn. 26 Kaj
li faris malbonon antaŭ la okuloj de la Eternulo, kaj
iris laŭ la vojo de sia patro kaj en liaj pekoj, per kiuj
li pekigis Izraelon. 27 Kaj faris konspiron kontraŭ li
Baaŝa, filo de Aĥija, el la domo de Isaĥar, kaj Baaŝa
mortigis lin ĉe Gibeton de la Filiŝtoj, kiam Nadab kaj
ĉiuj Izraelidoj sieĝis Gibetonon. 28 Kaj Baaŝa mortigis
lin en la tria jaro de Asa, reĝo de Judujo, kaj ekreĝis
anstataŭ li. 29 Kaj kiam li fariĝis reĝo, li mortigis la
tutan domon de Jerobeam; li ne restigis ĉe Jerobeam
eĉ unu animon, ĝis li tute lin ekstermis, konforme al
la vorto de la Eternulo, kiun Li diris per Sia servanto
Aĥija, la Ŝiloano; 30 pro la pekoj de Jerobeam, per kiuj
li pekis kaj per kiuj li pekigis Izraelon, pro la incito,
per kiu li kolerigis la Eternulon, Dion de Izrael. 31 La
cetera historio de Nadab, kaj ĉio, kion li faris, estas
priskribitaj en la libro de kroniko de la reĝoj de Izrael.
32 Milito estis inter Asa kaj Baaŝa, reĝo de Izrael, dum
ilia tuta vivo. 33 En la tria jaro de Asa, reĝo de Judujo,
ekreĝis Baaŝa, filo de Aĥija, super la tuta Izrael en
Tirca por la daŭro de dudek kvar jaroj. 34 Kaj li faris
malbonon antaŭ la okuloj de la Eternulo, kaj iris laŭ la
vojo de Jerobeam kaj en liaj pekoj, per kiuj li pekigis
Izraelon.

**16** Kaj aperis la vorto de la Eternulo al Jehu, filo de
Ĥanani, pri Baaŝa, dirante: 2 Ĉar mi levis vin el
la polvo kaj faris vin reganto super Mia popolo Izrael
kaj vi iras laŭ la vojo de Jerobeam kaj pekigas Mian
popolon Izrael, incitante Min per iliaj pekoj, 3 tial Mi
elbalaos Baaŝan kaj lian domon, kaj Mi faros kun via
domo kiel kun la domo de Jerobeam, filo de Nebat.
4 Kiu mortos ĉe Baaŝa en la urbo, tiun formanĝos
la hundoj, kaj kiu mortos ĉe li sur la kampo, tiun
formanĝos la birdoj de la ĉielo. 5 La cetera historio
de Baaŝa, kaj tio, kion li faris, kaj lia potenco estas
priskribitaj en la libro de kroniko de la reĝoj de
Izrael. 6 Kaj Baaŝa ekdormis kun siaj patroj, kaj oni
enterigis lin en Tirca. Kaj anstataŭ li ekreĝis lia filo
Ela. 7 Per la profeto Jehu, filo de Ĥanani, aperis la
vorto de la Eternulo pri Baaŝa kaj pri lia domo pro
la tuta malbono, kiun li faris antaŭ la okuloj de la
Eternulo, incitante Lin per la faroj de siaj manoj,
estante kiel la domo de Jerobeam, kaj pro tio, ke li
mortigis lin. 8 En la jaro dudek-sesa de Asa, reĝo
de Judujo, ekreĝis Ela, filo de Baaŝa, super Izrael en
Tirca por la daŭro de du jaroj. 9 Kaj faris konspiron
kontraŭ li lia servanto Zimri, estro de duono de la
ĉaroj. Kiam li en Tirca drinkis ĝis ebrieco en la domo
de Arca, palacestro de Tirca, 10 tiam venis Zimri kaj
frapis lin kaj mortigis lin, en la jaro dudek-sepa de
Asa, reĝo de Judujo, kaj faris sin reĝo anstataŭ li. 11
Kiam li fariĝis reĝo, kiam li eksidis sur lia trono, li
mortigis la tutan domon de Baaŝa, restigante ĉe li
neniun virseksulon, kaj ankaŭ liajn parencojn kaj
amikojn. 12 Kaj Zimri ekstermis la tutan domon de
Baaŝa, konforme al la vorto de la Eternulo, kiun Li
diris pri Baaŝa per la profeto Jehu, 13 pro ĉiuj pekoj
de Baaŝa kaj la pekoj de lia filo Ela, per kiuj ili pekis
kaj per kiuj ili pekigis Izraelon, incitante la Eternulon,
Dion de Izrael, per siaj idolaĵoj. 14 La cetera historio
de Ela, kaj ĉio, kion li faris, estas priskribitaj en la
libro de kroniko de la reĝoj de Izrael. 15 En la dudek-
sepa jaro de Asa, reĝo de Judujo, ekreĝis Zimri por
la daŭro de sep tagoj en Tirca, kiam la popolo sieĝis

Gibetonon de la Filiŝtoj. 16 Kiam la sieĝanta popolo
aŭdis, ke Zimri faris konspiron kaj mortigis la reĝon,
tiam la tuta popolo en la sama tago elektis kiel reĝon
Omrin, la militestron de Izrael. 17 Kaj Omri kune kun
la tuta Izrael foriris de Gibeton kaj eksieĝis Tircan.
18 Kiam Zimri vidis, ke la urbo estas prenita, li iris
en la palacon de la reĝa domo kaj ekbruligis ĉirkaŭ
si per fajro la reĝan domon, kaj mortis, 19 pro siaj
pekoj, per kiuj li pekis, farante malbonon antaŭ la
okuloj de la Eternulo, irante laŭ la vojo de Jerobeam
kaj en lia peko, kiun li faris, pekigante Izraelon. 20
La cetera historio de Zimri, kaj lia konspiro, kiun li
faris, estas priskribitaj en la libro de kroniko de la
reĝoj de Izrael. 21 Tiam la popolo Izraela dividiĝis en
du partojn: duono de la popolo aliĝis al Tibni, filo
de Ginat, por reĝigi lin, kaj la dua duono aliĝis al
Omri. 22 Kaj la popolo, kiu aliĝis al Omri, venkis tiun
popolon, kiu aliĝis al Tibni, filo de Ginat; kaj Tibni
mortis, kaj ekreĝis Omri. 23 En la tridek-unua jaro de
Asa, reĝo de Judujo, Omri ekreĝis super Izrael por
la daŭro de dek du jaroj. En Tirca li reĝis dum ses
jaroj. 24 Kaj li aĉetis la monton Samario de Ŝemer
pro du kikaroj da arĝento, kaj li prikonstruis tiun
monton, kaj al la urbo, kiun li konstruis, li donis la
nomon Samario, laŭ la nomo de Ŝemer, la mastro
de la monto. 25 Kaj Omri faris malbonon antaŭ la
okuloj de la Eternulo, kaj li agis pli malbone, ol ĉiuj,
kiuj estis antaŭ li. 26 Kaj li iris laŭ la tuta vojo de
Jerobeam, filo de Nebat, kaj en liaj pekoj, per kiuj
li pekigis Izraelon, incitante la Eternulon, Dion de
Izrael, per iliaj idolaĵoj. 27 La cetera historio de Omri,
tio, kion li faris, kaj liaj heroaĵoj, kiujn li faris, estas
priskribitaj en la libro de kroniko de la reĝoj de Izrael.
28 Kaj Omri ekdormis kun siaj patroj, kaj oni enterigis
lin en Samario. Kaj anstataŭ li ekreĝis lia filo Aĥab. 29
Aĥab, filo de Omri, ekreĝis super Izrael en la tridek-
oka jaro de Asa, reĝo de Judujo. Kaj Aĥab, filo de Omri,
reĝis super Izrael en Samario dudek du jarojn. 30 Kaj
Aĥab, filo de Omri, faris malbonon antaŭ la okuloj
de la Eternulo, pli ol ĉiuj, kiuj estis antaŭ li. 31 Ne
sufiĉis al li, ke li iris en la pekoj de Jerobeam, filo de
Nebat: li prenis al si kiel edzinon Izebelon, filinon de
Etbaal, reĝo de la Cidonanoj, kaj li iris kaj servis al
Baal kaj adorkliniĝis al li. 32 Kaj li starigis altaron al
Baal en la domo de Baal, kiun li konstruis en Samario.
33 Kaj Aĥab faris sanktajn stangojn, kaj Aĥab faris pli
da incitado kontraŭ la Eternulo, Dio de Izrael, ol ĉiuj
reĝoj de Izrael, kiuj estis antaŭ li. 34 En lia tempo
Ĥiel, Bet-Elano, konstruis Jeriĥon. Kun perdo de sia
unuenaskito Abiram li fondis ĝin, kaj kun perdo de
sia plej juna filo Segub li starigis ĝiajn pordegojn,
konforme al la vorto de la Eternulo, kiun Li diris per
Josuo, filo de Nun.

17 Kaj Elija, la Teŝebano, el la loĝantoj de Gilead,
diris al Aĥab: Kiel vivas la Eternulo, Dio de Izrael,
antaŭ kiu mi staras, ne estos en ĉi tiuj jaroj roso
nek pluvo, krom en la okazo, se mi tion diros. 2 Kaj
aperis la vorto de la Eternulo al li, dirante: 3 Foriru
de ĉi tie, kaj direktu vin orienten, kaj kaŝu vin ĉe la
torento Kerit, kiu estas oriente de Jordan. 4 El tiu
torento vi trinkados, kaj al la korvoj Mi ordonis, ke
ili tie vin nutru. 5 Kaj li iris kaj faris, kiel ordonis la
Eternulo; li iris kaj restis ĉe la torento Kerit, kiu estas
oriente de Jordan. 6 Kaj la korvoj alportadis al li panon
kaj viandon matene kaj panon kaj viandon vespere;
kaj el la torento li trinkadis. 7 Post kelka tempo la
torento elsekiĝis, ĉar ne estis pluvo en la lando. 8
Tiam aperis al li la vorto de la Eternulo, dirante: 9
Leviĝu, iru Carfaton, kiu apartenas al Cidon, kaj restu
tie; Mi ordonis tie al virino vidvino, ke ŝi liveradu al
vi manĝaĵon. 10 Kaj li leviĝis, kaj iris Carfaton. Kiam
li venis al la pordego de la urbo, li ekvidis virinon
vidvinon, kiu kolektis lignon. Kaj li vokis al ŝi, kaj
diris: Alportu al mi iom da akvo en vazo, por ke mi
trinku. 11 Kaj ŝi ekiris, por preni; tiam li vokis al ŝi,
kaj diris: Alportu al mi pecon da pano en viaj manoj.
12 Sed ŝi respondis: Kiel vivas la Eternulo, via Dio, mi
ne havas bakitaĵon, sed nur plenmanon da faruno en
la vazo kaj iom da oleo en la kruĉo; jen mi kolektis du
pecojn da ligno, kaj mi iros kaj pretigos tion por mi
kaj por mia filo, kaj ni tion manĝos kaj mortos. 13
Kaj Elija diris al ŝi: Ne timu, iru kaj faru, kiel vi diris;
tamen antaŭe faru al mi el tio malgrandan bakitaĵon
kaj alportu al mi; kaj por vi kaj por via filo vi faros
poste. 14 Ĉar tiele diras la Eternulo, Dio de Izrael: La
faruno en la vazo ne konsumiĝos, kaj la oleo en la
kruĉo ne mankos, ĝis la tago, kiam la Eternulo donos
pluvon sur la teron. 15 Kaj ŝi iris kaj faris, kiel ordonis
Elija; kaj manĝis ŝi kaj li kaj ŝia domo dum kelka
tempo. 16 La faruno en la vazo ne konsumiĝis, kaj la
oleo en la kruĉo ne mankis, konforme al la vorto de la
Eternulo, kiun Li diris per Elija. 17 Post tiu okazintaĵo
malsaniĝis la filo de la virino, la dommastrino; kaj lia

malsano estis tre forta, tiel, ke li tute ĉesis spiri. 18
Tiam ŝi diris al Elija: Kio estas inter mi kaj vi, homo
de Dio? Vi venis al mi, por rememorigi pri miaj pekoj
kaj mortigi mian filon! 19 Kaj li diris al ŝi: Donu al mi
vian filon. Kaj li prenis lin el ŝiaj brakoj, kaj portis lin
en la subtegmenton, en kiu li loĝis, kaj metis lin sur
sian liton. 20 Kaj li vokis al la Eternulo, kaj diris: Ho
Eternulo, mia Dio! ĉu eĉ al la vidvino, ĉe kiu mi loĝas,
Vi faros malbonon, mortigante ŝian filon? 21 Kaj li
etendis sin super la infano tri fojojn, kaj vokis al la
Eternulo, kaj diris: Ho Eternulo, mia Dio, revenigu la
animon de ĉi tiu infano en lian internon. 22 Kaj la
Eternulo aŭskultis la voĉon de Elija, kaj la animo de la
infano revenis en lian internon, kaj li reviviĝis. 23
Kaj Elija prenis la infanon kaj portis lin malsupren
el la subtegmento en la domon kaj redonis lin al lia
patrino; kaj Elija diris: Rigardu, via filo vivas. 24 Tiam
la virino diris al Elija: Nun mi eksciis, ke vi estas homo
de Dio kaj ke la vorto de la Eternulo en via buŝo estas
vera.

**18** Post multe da tempo aperis la vorto de la
Eternulo al Elija en la tria jaro, dirante: Iru,
montru vin al Aĥab, kaj Mi donos pluvon sur la teron.
2 Kaj Elija iris, por montri sin al Aĥab. La malsato estis
forta en Samario. 3 Aĥab vokis Obadjan, kiu estis lia
palacestro. (Obadja estis tre diotima; 4 kiam Izebel
ekstermis la profetojn de la Eternulo, Obadja prenis
cent profetojn kaj kaŝis ilin en kavernoj po kvindek
homoj kaj nutradis ilin per pano kaj akvo.) 5 Kaj Aĥab
diris al Obadja: Iru tra la lando al ĉiuj akvaj fontoj
kaj al ĉiuj torentoj; eble ni trovos herbon, por ke ni
povu konservi la vivon al la ĉevaloj kaj muloj kaj ne
ekstermiĝu al ni ĉiuj brutoj. 6 Kaj ili dividis inter si
la landon, por trairi ĝin: Aĥab iris aparte laŭ unu
direkto, kaj Obadja iris aparte laŭ alia direkto. 7 Kiam
Obadja estis sur la vojo, subite venis al li renkonte
Elija. Tiu rekonis lin kaj ĵetis sin vizaĝaltere, kaj diris:
Ĉu tio estas vi, mia sinjoro Elija? 8 Kaj ĉi tiu respondis
al li: Mi; iru, diru al via sinjoro, ke Elija estas ĉi tie. 9
Kaj li diris: Per kio mi pekis, ke vi transdonas vian
servanton en la manon de Aĥab, por ke li mortigu
min? 10 Kiel vivas la Eternulo, via Dio, ne ekzistas
popolo aŭ regno, kien mia sinjoro ne estus sendinta
min, por serĉi vin; kaj kiam ili diris, ke vi tie ne estas,
li ĵurigis tiun regnon kaj popolon, ke oni ne trovis vin.
11 Kaj nun vi diras: Iru, diru al via sinjoro, ke Elija estas
ĉi tie. 12 Kaj okazos, ke kiam mi foriros de vi, la spirito
de la Eternulo forportos vin, mi ne scias kien; mi
venos, por diri al Aĥab, kaj li ne trovos vin, kaj tiam li
mortigos min; kaj via servanto estas diotima de sia
juneco. 13 Ĉu oni ne rakontis al mia sinjoro, kion mi
faris, kiam Izebel mortigis la profetojn de la Eternulo,
ke mi kaŝis cent homojn el la profetoj de la Eternulo
en kavernoj po kvindek homoj kaj nutradis ilin per
pano kaj akvo? 14 Kaj nun vi diras: Iru, diru al via
sinjoro, ke Elija estas ĉi tie! li ja mortigos min. 15 Tiam
Elija diris: Kiel vivas la Eternulo Cebaot, antaŭ kiu mi
staras, hodiaŭ mi montros min al li. 16 Kaj Obadja
iris renkonte al Aĥab kaj diris al li. Tiam Aĥab iris
renkonte al Elija. 17 Kaj kiam Aĥab ekvidis Elijan, Aĥab
diris al li: Ĉu tio estas vi, kiu senordigas Izraelon?
18 Sed li respondis: Izraelon senordigis ne mi, sed
vi kaj la domo de via patro, per tio, ke vi forlasis la
ordonojn de la Eternulo kaj sekvis la Baalojn. 19 Kaj
nun sendu, kunvenigu al mi la tutan Izraelon sur la
monton Karmel, ankaŭ la kvarcent kvindek profetojn
de Baal kaj la kvarcent profetojn de Aŝtar, kiuj estas
nutrataj ĉe la tablo de Izebel. 20 Kaj Aĥab sendis al
ĉiuj Izraelidoj, kaj li kunvenigis la profetojn sur la
monton Karmel. 21 Tiam Elija aliris al la tuta popolo,
kaj diris: Kiel longe ankoraŭ vi lamos sur du flankoj?
se la Eternulo estas Dio, sekvu Lin; kaj se Baal, tiam
sekvu lin. Kaj la popolo nenion respondis al li. 22 Kaj
Elija diris al la popolo: Mi restis la sola profeto de
la Eternulo, kaj da profetoj de Baal estas kvarcent
kvindek homoj. 23 Oni donu do al ni du bovojn; kaj
ili elektu al si unu el la bovoj kaj dishaku ĝin kaj
metu sur la lignon, sed fajron ili ne submetu; kaj mi
pretigos la duan bovon kaj metos sur la lignon, kaj
fajron mi ne submetos. 24 Kaj voku al la nomo de via
dio, kaj mi vokos al la nomo de la Eternulo; kaj tiu
Dio, kiu respondos per fajro, estu konfesata kiel Dio.
Kaj la tuta popolo respondis kaj diris: Bone. 25 Kaj
Elija diris al la profetoj de Baal: Elektu al vi unu el la
bovoj kaj pretigu antaŭe, ĉar vi estas multaj; kaj voku
al la nomo de via dio, sed fajron ne submetu. 26 Kaj
ili prenis la bovon, kiun li donis al ili, kaj pretigis,
kaj vokadis al la nomo de Baal de la mateno ĝis la
tagmezo, dirante: Ho Baal, aŭskultu nin! Sed aperis
nenia voĉo nek respondo. Kaj ili saltadis ĉirkaŭ la
altaro, kiun ili faris. 27 Kiam fariĝis tagmezo, Elija
mokis ilin, kaj diris: Kriu per laŭta voĉo, ĉar li estas
dio; eble li havas interparoladon, aŭ eble li foriris, aŭ

eble li vojaĝas; eble li dormas, li do vekiĝos. 28 Kaj
ili kriis per laŭta voĉo, kaj pikis sin laŭ sia kutimo
per glavoj kaj lancoj, ĝis sango verŝiĝis sur ili. 29
Kiam pasis la tagmezo, ili ĉiam ankoraŭ faradis la
ceremoniojn, ĝis venis la tempo, kiam oni faras la
farunoferojn; sed estis nenia voĉo, nenia respondo,
nenia atento. 30 Tiam Elija diris al la tuta popolo: Aliru
al mi. Kaj la tuta popolo aliris al li. Kaj li rekonstruis
la detruitan altaron de la Eternulo. 31 Kaj Elija prenis
dek du ŝtonojn, laŭ la nombro de la triboj de la
filoj de Jakob, al kiu aperis la vorto de la Eternulo,
dirante: Via nomo estu Izrael. 32 Kaj li konstruis el
la ŝtonoj altaron en la nomo de la Eternulo, kaj li
faris ĉirkaŭ la altaro foson, havantan la amplekson
de du grenmezuroj. 33 Kaj li aranĝis la lignon, kaj
dishakis la bovon kaj metis ĝin sur la lignon. 34 Kaj
li diris: Plenigu kvar sitelojn per akvo, kaj oni verŝu
tion sur la bruloferon kaj sur la lignon. Poste li diris:
Ripetu. Kaj oni ripetis. Kaj li diris: Faru same la trian
fojon. Kaj oni faris same la trian fojon. 35 Kaj la akvo
verŝiĝis ĉirkaŭen de la altaro, kaj ankaŭ la tuta foso
pleniĝis de akvo. 36 Kaj kiam venis la tempo, kiam oni
faras farunoferon, la profeto Elija aliris, kaj diris: Ho
Eternulo, Dio de Abraham, Isaak, kaj Izrael! hodiaŭ
oni eksciu, ke Vi estas Dio ĉe Izrael kaj mi estas Via
servanto, kaj ke laŭ Via vorto mi faris ĉion ĉi tion. 37
Aŭskultu min, ho Eternulo, aŭskultu min, por ke ĉi tiu
popolo eksciu, ke Vi, Eternulo, estas Dio, kaj por ke Vi
konvertu ilian koron returne. 38 Tiam falis fajro de la
Eternulo kaj konsumis la bruloferon kaj la lignon kaj
la ŝtonojn kaj la polvon; kaj la akvon, kiu estis en la
foso, ĝi forlekis. 39 Kiam la tuta popolo tion vidis,
ili ĵetis sin vizaĝaltere, kaj diris: La Eternulo estas
Dio, la Eternulo estas Dio. 40 Tiam Elija diris al ili:
Kaptu la profetojn de Baal, ke neniu el ili saviĝu. Kaj
oni kaptis ilin; kaj Elija forkondukis ilin al la torento
Kiŝon kaj buĉis ilin tie. 41 Kaj Elija diris al Aĥab: Iru,
manĝu kaj trinku, ĉar aŭdiĝas bruo de pluvo. 42 Kaj
Aĥab iris, por manĝi kaj trinki; sed Elija suriris sur
la supron de Karmel kaj kliniĝis al la tero kaj metis
sian vizaĝon inter siajn genuojn. 43 Kaj li diris al sia
junulo: Iru kaj rigardu en la direkto al la maro. Tiu
iris kaj rigardis, kaj diris: Estas nenio. Kaj li diris: Iru
denove, sep fojojn. 44 En la sepa fojo tiu diris: Jen
malgranda nubo, kiel manplato de homo, leviĝas de
la maro. Tiam li diris: Iru, diru al Aĥab: Jungu kaj
forveturu, por ke vin ne retenu la pluvo. 45 Dume de
momento al momento la ĉielo mallumiĝis de nuboj
kaj vento, kaj fariĝis granda pluvo. Kaj Aĥab ekveturis
kaj direktis sin al Jizreel. 46 Kaj la mano de la Eternulo
estis super Elija. Li zonis siajn lumbojn kaj kuris antaŭ
Aĥab ĝis Jizreel.

19 Aĥab rakontis al Izebel ĉion, kion faris Elija, kaj
tion, ke li mortigis ĉiujn profetojn per glavo.
2 Tiam Izebel sendis senditon al Elija, por diri: La
dioj faru al mi tion kaj pli, se mi morgaŭ en ĉi tiu
tempo ne faros kun via animo, kiel estas farite kun la
animo de ĉiu el ili. 3 Li ektimis, kaj leviĝis kaj foriris,
por savi sian vivon; kaj li venis en Beer-Ŝeban, kiu
troviĝas en Judujo, kaj restigis tie sian junulon. 4 Sed
li mem iris en la dezerton vojiron de unu tago, kaj
venis kaj sidiĝis sub unu genisto kaj petis morton por
sia animo, kaj diris: Sufiĉas nun, ho Eternulo! prenu
mian animon, ĉar mi ne estas pli bona ol miaj patroj.
5 Kaj li kuŝiĝis kaj endormiĝis sub la genisto; kaj jen
anĝelo ektuŝis lin, kaj diris al li: Leviĝu, manĝu. 6 Li
ekrigardis, kaj jen ĉe sia kaploko li ekvidis bakitan
paneton kaj kruĉon kun akvo. Kaj li manĝis kaj trinkis,
kaj denove kuŝiĝis, por dormi. 7 Kaj la anĝelo de la
Eternulo revenis duan fojon kaj ektuŝis lin, kaj diris:
Leviĝu, manĝu, ĉar vin atendas granda vojo. 8 Kaj li
leviĝis kaj manĝis kaj trinkis; kaj per la forto, kiun
li ricevis de tiu manĝado, li iris kvardek tagojn kaj
kvardek noktojn ĝis Ĥoreb, la monto de Dio. 9 Kaj tie
li eniris en kavernon kaj tradormis tie. Kaj jen aperis
al li vorto de la Eternulo, kaj diris al li: Kion vi faras
ĉi tie, Elija? 10 Kaj li respondis: Mi fervoris pro la
Eternulo, Dio Cebaot, ĉar la Izraelidoj forlasis Vian
interligon, detruis Viajn altarojn, kaj mortigis Viajn
profetojn per glavo; mi sola restis, sed oni serĉas
mian animon, por forpreni ĝin. 11 Kaj Li diris: Eliru
kaj stariĝu sur la monto antaŭ la Eternulo. Kaj jen la
Eternulo preteriras, kaj granda kaj forta vento disŝiras
montojn kaj disrompas rokojn antaŭ la Eternulo; sed
ne en la vento estis la Eternulo. Post la vento estis
tertremo, sed ne en la tertremo estis la Eternulo. 12
Post la tertremo estis fajro, sed ne en la fajro estis
la Eternulo. Post la fajro aŭdiĝis blovado de delikata
venteto. 13 Kiam Elija tion ekaŭdis, li kovris sian
vizaĝon per sia mantelo, kaj eliris kaj stariĝis ĉe la
enirejo de la kaverno. Kaj jen aperis al li voĉo, kaj
diris: Kion vi faras ĉi tie, Elija? 14 Kaj li respondis: Mi
fervoris pro la Eternulo, Dio Cebaot, ĉar la Izraelidoj

forlasis Vian interligon, detruis Viajn altarojn, kaj
mortigis Viajn profetojn per glavo; mi sola restis,
sed oni serĉas mian animon, por forpreni ĝin. 15
Kaj la Eternulo diris al li: Iru returne vian vojon
tra la dezerto al Damasko; kiam vi venos, sanktoleu
Ĥazaelon kiel reĝon super Sirio; 16 kaj Jehun, filon de
Nimŝi, sanktoleu kiel reĝon super Izrael; kaj Eliŝan,
filon de Ŝafat, el Abel-Meĥola, sanktoleu kiel profeton
anstataŭ vi. 17 Kaj estos, ke kiu saviĝos de la glavo
de Ĥazael, tiun mortigos Jehu; kaj kiu saviĝos de la
glavo de Jehu, tiun mortigos Eliŝa. 18 Mi restigos el
Izrael sep mil, ĉiujn, kies genuoj ne fleksiĝis antaŭ
Baal kaj kies buŝo ne kisis lin. 19 Kaj li foriris de tie,
kaj trovis Eliŝan, filon de Ŝafat, kiu estis pluganta; dek
du bovoparoj estis antaŭ li, kaj li mem estis ĉe la dek-
dua. Kaj Elija aliris al li kaj ĵetis al li sian mantelon.
20 Kaj tiu forlasis la brutojn kaj ekkuris al Elija, kaj
diris: Permesu al mi nur kisi mian patron kaj mian
patrinon, kaj mi sekvos vin. Kaj li diris al li: Iru kaj
revenu, ĉar kion mi faris al vi? 21 Kaj tiu foriris de
li, kaj prenis paron da bovoj kaj buĉis ilin, kaj sur la
jungaĵo de la bovoj li kuiris la viandon kaj donis al la
homoj, kaj ili manĝis. Kaj li leviĝis kaj eksekvis Elijan
kaj ekservis lin.

**20** Ben-Hadad, reĝo de Sirio, kolektis sian tutan
militistaron; kun li estis tridek du reĝoj, kaj
ĉevalojn kaj ĉarojn; kaj li iris kaj eksieĝis Samarion kaj
militis kontraŭ ĝi. 2 Kaj li sendis senditojn al Aĥab,
reĝo de Izrael, en la urbon, 3 kaj dirigis al li: Tiele diras
Ben-Hadad: Via arĝento kaj via oro devas esti miaj,
kaj viaj edzinoj kaj viaj plej bonaj filoj devas esti miaj.
4 Kaj la reĝo de Izrael respondis kaj diris: Konforme
al via diro, mia sinjoro, ho reĝo, al vi apartenas mi,
kaj ĉio, kion mi havas. 5 La senditoj venis denove,
kaj diris: Tiele diras Ben-Hadad: Ĉar mi sendis al vi,
por diri, ke vian arĝenton kaj vian oron kaj viajn
edzinojn kaj viajn filojn vi donu al mi, 6 tial morgaŭ
en ĉi tiu tempo mi sendos miajn servantojn al vi,
por ke ili traserĉu vian domon kaj la domojn de viaj
servantoj, kaj por ke ĉion, kio estas kara al vi, ili prenu
en siajn manojn kaj forportu. 7 Tiam la reĝo de Izrael
kunvokis ĉiujn plejaĝulojn de la lando, kaj diris: Sciu
kaj rigardu, kian malbonon li intencas; ĉar li sendis al
mi, por postuli miajn edzinojn kaj miajn filojn kaj
mian arĝenton kaj mian oron, kaj mi ne rifuzis al li.
8 Kaj ĉiuj plejaĝuloj kaj la tuta popolo diris al li: Ne
obeu, kaj ne konsentu. 9 Tiam li diris al la senditoj de
Ben-Hadad: Diru al mia sinjoro la reĝo: Ĉion, pri kio vi
sendis al via servanto la unuan fojon, mi plenumos;
sed ĉi tion mi ne povas fari. Kaj la senditoj iris kaj
transdonis la vortojn. 10 Tiam Ben-Hadad sendis al
li, kaj dirigis: La dioj faru al mi tion kaj pli, se la
polvo de Samario sufiĉos, ke ĉiuj homoj, kiuj min
sekvas, povu preni manplenon da ĝi. 11 Sed la reĝo
de Izrael respondis kaj diris: Diru: Kiu surmetas la
zonon, ne fanfaronu kiel tiu, kiu ĝin demetas. 12 Kiam
Ben-Hadad aŭdis tiujn vortojn, dum li kaj la reĝoj
estis drinkantaj en la tendoj, li diris al siaj servantoj:
Aranĝu vin. Kaj ili aranĝis sin kontraŭ la urbo. 13 Kaj
jen unu profeto aliris al Aĥab, reĝo de Izrael, kaj diris:
Tiele diras la Eternulo: Ĉu vi vidas tiun tutan grandan
amason? jen Mi hodiaŭ transdonos ĝin al vi, por ke vi
sciu, ke Mi estas la Eternulo. 14 Kaj Aĥab diris: Per
kiu? Kaj tiu respondis: Tiele diras la Eternulo: Per la
junuloj de la regionestroj. Kaj li diris: Kiu komencos
la batalon? Kaj tiu respondis: Vi. 15 Tiam li kalkulis
la junulojn de la regionestroj, kaj montriĝis, ke ilia
nombro estas ducent tridek du; post ili li kalkulis
la tutan popolon, ĉiujn Izraelidojn, sep mil. 16 Ili
eliris en tagmezo, kiam Ben-Hadad drinkis ebria en la
tendoj, li kaj la reĝoj, la tridek du reĝoj, kiuj helpis
lin. 17 Antaŭe eliris la junuloj de la regionestroj. Ben-
Hadad sendis, kaj oni raportis al li, dirante: Viroj eliris
el Samario. 18 Tiam li diris: Se por paco ili eliris, kaptu
ilin vivajn; kaj se ili eliris por milito, ankaŭ kaptu
ilin vivajn. 19 Tiuj eliris el la urbo, la junuloj de la
regionestroj, kaj la militistaro post ili. 20 Kaj ili batis
ĉiu sian renkontiton; kaj la Sirianoj forkuris, kaj la
Izraelidoj ilin postkuris. Kaj Ben-Hadad, reĝo de Sirio,
savis sin sur ĉevalo kun la rajdistoj. 21 Tiam eliris la
reĝo de Izrael kaj venkobatis la ĉevalojn kaj la ĉarojn,
kaj li faris inter la Sirianoj grandan buĉon. 22 Kaj
aliris la profeto al la reĝo de Izrael, kaj diris al li: Iru,
fortigu vin, atendu kaj rigardu, kion vi devas fari; ĉar
post paso de unu jaro la reĝo de Sirio iros kontraŭ
vin. 23 Kaj la servantoj de la reĝo de Sirio diris al li:
Ilia Dio estas Dio de montoj, tial ili venkis nin; sed se
ni batalos kontraŭ ili sur ebenaĵo, ni certe venkos ilin.
24 Faru jenon: forigu la reĝojn ĉiun de lia loko, kaj
starigu anstataŭ ili regionestrojn; 25 kaj kolektu al vi
militistaron egalan al tiu, kiu falis ĉe vi, kaj ĉevalojn
nombregale al tiuj ĉevaloj kaj ĉarojn nombregale al
tiuj ĉaroj; kaj ni batalos kontraŭ ili sur ebenaĵo, kaj

tiam ni certe ilin venkos. Kaj li obeis ilian voĉon kaj
faris tiel. 26 Post paso de la jaro Ben-Hadad revuis
la Sirianojn, kaj iris en Afekon, por militi kontraŭ
la Izraelidoj. 27 Kaj la Izraelidoj ankaŭ pretigis sin
kaj provizis sin per nutraĵoj kaj iris renkonte al ili.
Kaj la Izraelidoj stariĝis tendare kontraŭ ili, kiel du
malgrandaj kapraroj; sed la Sirianoj plenigis la tutan
landon. 28 Tiam aliris homo de Dio, kaj diris al la
reĝo de Izrael: Tiele diras la Eternulo: Pro tio, ke la
Sirianoj diris, ke la Eternulo estas Dio de montoj kaj
Li ne estas Dio de valoj, Mi transdonos tiun tutan
grandan amason en vian manon, por ke vi sciu, ke Mi
estas la Eternulo. 29 Kaj staris tendare unuj kontraŭ
la aliaj dum sep tagoj. En la sepa tago komenciĝis la
batalo; kaj la Izraelidoj mortigis el la Sirianoj cent mil
piedirantojn en unu tago. 30 La ceteraj forkuris en
la urbon Afek. Kaj la murego falis sur la restintajn
dudek sep mil. Kaj Ben-Hadad kuris kaj venis en la
urbon, en plej internan ĉambron de unu domo. 31
Kaj liaj servantoj diris al li: Ni aŭdis, ke la reĝoj de
la domo de Izrael estas reĝoj kompatemaj; ni metu
do sakaĵon sur niajn lumbojn kaj ŝnurojn sur niajn
kapojn, kaj ni eliru al la reĝo de Izrael; eble li lasos la
vivon al via animo. 32 Kaj ili zonis per sakaĵo siajn
lumbojn kaj metis ŝnurojn sur siajn kapojn, kaj venis
al la reĝo de Izrael, kaj diris: Via servanto Ben-Hadad
diras: Mi petas lasi la vivon al mia animo. Kaj tiu diris:
Ĉu li vivas ankoraŭ? li estas mia frato. 33 La homoj
prenis tion kiel bonan signon, kaj rapidis certiĝi, ĉu
tio estas pri li, kaj ili diris: Via frato Ben-Hadad. Kaj li
diris: Iru, venigu lin. Tiam eliris al li Ben-Hadad, kaj li
sidigis lin sur la ĉaro. 34 Kaj tiu diris al li: La urbojn,
kiujn mia patro prenis de via patro, mi redonos; kaj
vi povas aranĝi al vi stratojn en Damasko, kiel mia
patro aranĝis en Samario. (Kaj Aĥab diris: ) Kaj mi
forliberigos vin kun jena interligo. Kaj li faris kun
li interligon kaj forliberigis lin. 35 Tiam unu viro el
la profetidoj diris al sia kamarado laŭ la vorto de la
Eternulo: Batu min. Sed tiu homo ne volis lin bati. 36
Tiam li diris al tiu: Pro tio, ke vi ne obeis la voĉon
de la Eternulo, mortigos vin leono, kiam vi foriros
de mi. Tiu foriris de li, kaj lin renkontis leono kaj
mortigis lin. 37 Li trovis alian homon, kaj diris: Batu
min. Kaj la homo lin batis tiel, ke li vundis lin per la
batado. 38 Tiam la profeto iris kaj stariĝis antaŭ la
reĝo sur la vojo kaj kovris per kovrotuko siajn okulojn.
39 Kiam la reĝo iris pretere, li ekkriis al la reĝo, kaj
diris: Via servanto eliris en batalon, kaj jen unu homo
sin deturnis kaj alkondukis al mi alian homon, kaj
diris: Gardu ĉi tiun homon; se li malaperos, tiam via
animo anstataŭos lian animon, aŭ vi devos pese pagi
kikaron da arĝento. 40 Dum via servanto estis faranta
tion kaj alion, tiu malaperis. Kaj la reĝo de Izrael
diris al li: Tio estas via verdikto, vi mem decidis. 41
Tiam li rapide forprenis la kovrotukon de siaj okuloj,
kaj la reĝo rekonis lin, ke li estas el la profetoj. 42
Kaj li diris al li: Tiele diras la Eternulo: Pro tio, ke vi
forlasis el la mano la homon, kiun Mi kondamnis, via
animo anstataŭos lian animon kaj via popolo lian
popolon. 43 Kaj la reĝo de Izrael iris hejmen malĝoja
kaj afliktita, kaj venis Samarion.

21 Post tiu historio okazis jeno: Nabot, Jizreelano,
havis vinberĝardenon en Jizreel, apud la palaco
de Aĥab, reĝo de Samario. 2 Kaj Aĥab ekparolis al
Nabot, dirante: Donu al mi vian vinberĝardenon,
por ke ĝi fariĝu por mi legomĝardeno, ĉar ĝi estas
proksime de mia domo; kaj mi donos al vi anstataŭ ĝi
vinberĝardenon pli bonan ol ĝi; se vi volas, mi donos
al vi per arĝento ĝian prezon. 3 Sed Nabot diris al
Aĥab: La Eternulo gardu min, ke mi ne fordonu al
vi la heredaĵon de miaj patroj. 4 Tiam Aĥab revenis
hejmen malĝoja kaj afliktita pro la vortoj, kiujn diris
al li Nabot, la Jizreelano, dirante: Mi ne donos al
vi la heredaĵon de miaj patroj. Kaj li kuŝiĝis sur
sia lito kaj forturnis sian vizaĝon kaj ne manĝis
panon. 5 Kaj venis al li lia edzino Izebel, kaj diris
al li: Kial via spirito estas tiel malĝoja, ke vi ne
manĝas panon? 6 Li respondis al ŝi: Kiam mi parolis al
Nabot, la Jizreelano, kaj diris al li: Donu al mi vian
vinberĝardenon pro mono, aŭ, se vi volas, mi donos
al vi alian vinberĝardenon anstataŭ ĝi, li diris: Mi ne
donos al vi mian vinberĝardenon. 7 Tiam diris al li
lia edzino Izebel: Nun vi montru vian reĝecon super
Izrael; leviĝu, manĝu panon, kaj estu bonhumora: mi
donos al vi la vinberĝardenon de Nabot, la Jizreelano.
8 Kaj ŝi skribis leterojn en la nomo de Aĥab kaj sigelis
per lia sigelilo, kaj ŝi sendis la leterojn al la plejaĝuloj
kaj al la eminentuloj, kiuj loĝis kun Nabot en lia urbo.
9 Kaj ŝi skribis en la leteroj jenon: Proklamu faston kaj
sidigu Naboton sur la ĉefa loko inter la popolo; 10
kaj sidigu apud li du homojn malvirtajn, kaj ili atestu
kontraŭ li kaj diru: Vi blasfemis kontraŭ Dio kaj la
reĝo; kaj oni elkonduku lin, kaj priĵetu lin per ŝtonoj,

ke li mortu. 11 Kaj la viroj de lia urbo, la plejaĝuloj kaj
la eminentuloj, kiuj loĝis en lia urbo, faris kiel ordonis
al ili Izebel, kiel estis skribite en la leteroj, kiujn ŝi
sendis al ili. 12 Ili proklamis faston kaj sidigis Naboton
sur la ĉefa loko inter la popolo. 13 Kaj venis du homoj
malvirtaj kaj sidiĝis apud li, kaj la malvirtaj homoj
atestis kontraŭ Nabot antaŭ la popolo, dirante: Nabot
blasfemis kontraŭ Dio kaj la reĝo. Kaj oni elkondukis
lin ekster la urbon kaj priĵetis lin per ŝtonoj, kaj li
mortis. 14 Kaj oni sendis al Izebel, por diri: Nabot estas
priĵetita per ŝtonoj kaj mortis. 15 Kiam Izebel aŭdis,
ke Nabot estas priĵetita per ŝtonoj kaj mortis, Izebel
diris al Aĥab: Leviĝu, ekposedu la vinberĝardenon de
Nabot, la Jizreelano, kiun li ne volis doni al vi pro
mono; ĉar Nabot jam ne vivas; li mortis. 16 Kiam
Aĥab aŭdis, ke Nabot mortis, Aĥab leviĝis, por iri
en la vinberĝardenon de Nabot, la Jizreelano, por
ekposedi ĝin. 17 Tiam aperis la vorto de la Eternulo al
Elija, la Teŝebano, dirante: 18 Leviĝu, iru renkonte
al Aĥab, reĝo de Izrael, kiu estas en Samario; jen li
nun estas en la vinberĝardeno de Nabot, kien li iris,
por ekposedi ĝin; 19 kaj diru al li jene: Tiele diras
la Eternulo: Vi mortigis, kaj vi ankoraŭ prenas en
posedon! Kaj diru al li: Tiele diras la Eternulo: Sur la
loko, kie la hundoj lekis la sangon de Nabot, la hundoj
lekos ankaŭ vian sangon. 20 Kaj Aĥab diris al Elija: Vi
trovis min, ho mia malamiko! Kaj tiu diris: Mi trovis,
ĉar vi vin vendis, por fari malbonon antaŭ la okuloj
de la Eternulo. 21 Jen Mi venigos sur vin malbonon,
kaj forbalaos la postesignojn post vi, kaj Mi ekstermos
ĉe Aĥab ĉiun virseksulon, malliberulon kaj liberulon
en Izrael. 22 Kaj Mi agos kun via domo, kiel kun la
domo de Jerobeam, filo de Nebat, kaj kiel kun la domo
de Baaŝa, filo de Aĥija, pro la incito, per kiu vi Min
incitis kaj pekigis Izraelon. 23 Kaj ankaŭ pri Izebel
parolis la Eternulo, dirante: La hundoj formanĝos
Izebelon apud la murego de Jizreel. 24 Kiu mortos
ĉe Aĥab en la urbo, tiun manĝos la hundoj; kaj kiu
mortos sur la kampo, tiun manĝos la birdoj de la
ĉielo. 25 Estis neniu tia, kiel Aĥab, kiu fordonis sin al
farado de malbono antaŭ la okuloj de la Eternulo, al
kio instigadis lin lia edzino Izebel. 26 Li fariĝis tre
abomeninda, sekvante la idolojn, konforme al ĉio,
kion faradis la Amoridoj, kiujn la Eternulo forpelis de
antaŭ la Izraelidoj.) 27 Kiam Aĥab aŭdis tiujn vortojn,
li disŝiris siajn vestojn kaj metis sakaĵon sur sian
korpon kaj fastis kaj dormis en la sakaĵo kaj iradis
malĝoje. 28 Tiam aperis vorto de la Eternulo al Elija, la
Teŝebano, dirante: 29 Ĉu vi vidas, kiel Aĥab humiliĝis
antaŭ Mi? Pro tio, ke li humiliĝis antaŭ Mi, Mi ne
venigos la malbonon dum lia vivo; dum la vivo de lia
filo Mi venigos la malbonon sur lian domon.

22 Pasis tri jaroj, kaj estis nenia milito inter Sirio kaj
Izrael. 2 En la tria jaro Jehoŝafat, reĝo de Judujo,
venis al la reĝo de Izrael. 3 La reĝo de Izrael diris al siaj
servantoj: Ĉu vi scias, ke Ramot en Gilead apartenas
al ni? kaj ni ne zorgas preni ĝin el la manoj de la
reĝo de Sirio! 4 Kaj li diris al Jehoŝafat: Ĉu vi iros kun
mi milite kontraŭ Ramoton en Gilead? Kaj Jehoŝafat
diris al la reĝo de Izrael: Mi estas kiel vi, mia popolo
kiel via popolo, miaj ĉevaloj kiel viaj ĉevaloj. 5 Kaj
Jehoŝafat diris al la reĝo de Izrael: Demandu hodiaŭ
la vorton de la Eternulo. 6 Tiam la reĝo de Izrael
kunvenigis la profetojn, ĉirkaŭe kvarcent homojn,
kaj diris al ili: Ĉu mi iru milite kontraŭ Ramoton en
Gilead, aŭ mi tion ne faru? Kaj ili respondis: Iru, la
Sinjoro ĝin transdonos en la manon de la reĝo. 7
Sed Jehoŝafat diris: Ĉu ne troviĝas ĉi tie ankoraŭ iu
profeto de la Eternulo, kiun ni povus demandi? 8 Kaj
la reĝo de Izrael diris al Jehoŝafat: Ekzistas ankoraŭ
unu homo, per kiu ni povas demandi la Eternulon,
sed mi lin malamas, ĉar li profetas pri mi ne bonon,
sed nur malbonon; tio estas Miĥaja, filo de Jimla. Sed
Jehoŝafat diris: La reĝo ne parolu tiel. 9 Tiam la reĝo
de Izrael alvokis unu korteganon, kaj diris: Venigu
rapide Miĥajan, filon de Jimla. 10 La reĝo de Izrael,
kaj Jehoŝafat, reĝo de Judujo, sidis ĉiu sur sia seĝo,
vestitaj per siaj vestoj, sur placo antaŭ la pordego de
Samario, kaj ĉiuj profetoj profetadis antaŭ ili. 11 Kaj
Cidkija, filo de Kenaana, faris al si ferajn kornojn, kaj
diris: Tiele diras la Eternulo: Per ĉi tio vi kornobatos la
Sirianojn, ĝis vi ilin tute ekstermos. 12 Kaj ĉiuj profetoj
profetis tiel same, dirante: Iru kontraŭ Ramoton en
Gilead kaj sukcesu, kaj la Eternulo ĝin transdonos
en la manon de la reĝo. 13 La sendito, kiu iris por
voki Miĥajan, diris al li: Jen la vortoj de la profetoj
unuanime antaŭdiras bonon al la reĝo; estu do via
vorto simila al la vorto de ĉiu el ili, kaj antaŭdiru
bonon. 14 Sed Miĥaja diris: Kiel vivas la Eternulo:
kion diros la Eternulo al mi, tion mi diros. 15 Kaj kiam
li venis al la reĝo, la reĝo diris al li: Miĥaja! ĉu ni
iru milite kontraŭ Ramoton en Gilead, aŭ ni tion ne
faru? Kaj tiu respondis al li: Iru kaj sukcesu, kaj la

Eternulo ĝin transdonos en la manon de la reĝo. 16
Kaj la reĝo diris al li: Multfoje mi vin ĵurligas, ke vi
parolu al mi nur la veron en la nomo de la Eternulo.
17 Kaj tiu diris: Mi vidis ĉiujn Izraelidojn disĵetitaj sur
la montoj, kiel ŝafoj, kiuj ne havas paŝtanton; kaj la
Eternulo diris: Ili ne havas estrojn, ili reiru pace ĉiu al
sia domo. 18 Kaj la reĝo de Izrael diris al Jehoŝafat: Ĉu
mi ne diris al vi, ke li profetos pri mi ne bonon, sed
nur malbonon? 19 Sed Miĥaja diris: Tial aŭskultu la
vorton de la Eternulo: mi vidis la Eternulon, sidantan
sur Sia trono, kaj la tuta armeo de la ĉielo staris antaŭ
Li dekstre kaj maldekstre de Li. 20 Kaj la Eternulo
diris: Kiu allogos Aĥabon, ke li iru kaj falu en Ramot
en Gilead? Kaj unu parolis tiel, alia parolis alie. 21
Tiam eliris spirito kaj stariĝis antaŭ la Eternulo, kaj
diris: Mi lin allogos. Kaj la Eternulo diris al li: Per
kio? 22 Kaj tiu diris: Mi eliros kaj faros min spirito
mensoga en la buŝo de ĉiuj liaj profetoj. Tiam Li diris:
Vi allogos kaj havos sukceson; eliru kaj agu tiel. 23
Kaj nun jen la Eternulo metis mensogan spiriton en
la buŝon de ĉiuj tiuj viaj profetoj, kaj la Eternulo
decidis por vi malbonon. 24 Tiam aliris Cidkija, filo de
Kenaana, kaj frapis Miĥajan sur la vango, kaj diris:
Per kiu vojo la spirito de la Eternulo transiris de mi,
por paroli per vi? 25 Kaj Miĥaja respondis: Jen vi
tion vidos en tiu tago, kiam vi eniros en internan
ĉambron, por vin kaŝi. 26 Tiam la reĝo de Izrael diris:
Prenu Miĥajan, kaj konduku lin al la urbestro Amon
kaj al la reĝido Joaŝ; 27 kaj diru: Tiele diras la reĝo:
Metu ĉi tiun en malliberejon, kaj nutru lin per mizera
pano kaj mizera akvo, ĝis mi revenos en paco. 28 Kaj
Miĥaja diris: Se vi revenos en paco, en tiu okazo ne
parolis per mi la Eternulo. Kaj li diris: Aŭskultu, ĉiuj
popoloj. 29 Kaj la reĝo de Izrael, kaj Jehoŝafat, reĝo
de Judujo, iris al Ramot en Gilead. 30 Kaj la reĝo de
Izrael diris al Jehoŝafat: Mi alivestos min kaj iros en la
batalon; sed vi surmetu viajn vestojn. Kaj la reĝo de
Izrael alivestis sin kaj iris en la batalon. 31 La reĝo de
Sirio ordonis al la tridek du ĉarestroj, kiuj estis ĉe li,
dirante: Batalu ne kontraŭ iu malgranda aŭ granda,
sed sole nur kontraŭ la reĝo de Izrael. 32 Kiam la
ĉarestroj ekvidis Jehoŝafaton, ili pensis, ke tio certe
estas la reĝo de Izrael, kaj ili turnis sin kontraŭ lin,
por batali; kaj Jehoŝafat ekkriis. 33 Kiam la ĉarestroj
vidis, ke tio ne estas la reĝo de Izrael, ili forturnis sin
de li. 34 Kaj unu viro sen ia celo streĉis la pafarkon,
kaj pafe trafis la reĝon de Izrael inter la artikoj de
la kiraso. Tiam ĉi tiu diris al sia veturiganto: Turnu
vian manon, kaj elveturigu min el la militistaro, ĉar
mi estas vundita. 35 Sed la batalo plifortiĝis en tiu
tago, kaj la reĝo staris sur la ĉaro kontraŭ la Sirianoj,
kaj li mortis vespere. Kaj la sango el la vundo fluis
en la mezon de la ĉaro. 36 Post la subiro de la suno
tra la militistaro ekkuris voko: Ĉiu en sian urbon, ĉiu
en sian landon. 37 La reĝo mortis, kaj oni venigis lin
en Samarion, kaj oni enterigis la reĝon en Samario.
38 Kaj oni lavis la ĉaron ĉe la lageto de Samario, kaj
la hundoj lekis lian sangon kaj malĉastistinoj lavis,
konforme al la vorto de la Eternulo, kiun Li diris. 39
La cetera historio de Aĥab, kaj ĉio, kion li faris, kaj la
ebura domo, kiun li konstruis, kaj ĉiuj urboj, kiujn li
konstruis, estas priskribitaj en la libro de kroniko de la
reĝoj de Izrael. 40 Kiam Aĥab ekdormis kun siaj patroj,
anstataŭ li ekreĝis lia filo Aĥazja. 41 Jehoŝafat, filo de
Asa, ekreĝis super Judujo en la kvara jaro de Aĥab,
reĝo de Izrael. 42 Jehoŝafat havis la aĝon de tridek
kvin jaroj, kiam li fariĝis reĝo, kaj dudek kvin jarojn li
reĝis en Jerusalem. La nomo de lia patrino estis Azuba,
filino de Ŝilĥi. 43 Li iradis tute laŭ la vojo de sia patro
Asa; li ne deturniĝis de ĝi, agante tiel, kiel plaĉas al la
Eternulo. Nur la altaĵoj ne estis forigitaj; la popolo
ankoraŭ oferportadis kaj incensadis sur la altaĵoj.
44 Kaj Jehoŝafat havis pacon kun la reĝo de Izrael.
45 La cetera historio de Jehoŝafat, kaj liaj heroaĵoj,
kiujn li faris, kaj kiel li militis, estas priskribitaj en la
libro de kroniko de la reĝoj de Judujo. 46 La lastan
kvanton da malĉastistoj, kiuj restis ankoraŭ dum la
vivo de lia patro Asa, li ekstermis el la lando. 47 Tiam
ne estis reĝo en Edomujo; estis anstataŭanto de reĝo.
48 Jehoŝafat faris Tarŝiŝajn ŝipojn, kiuj devis iri Ofiron,
por preni oron; sed ili ne iris, ĉar la ŝipoj rompiĝis
en Ecjon-Geber. 49 Tiam Aĥazja, filo de Aĥab, diris
al Jehoŝafat: Permesu, ke miaj servantoj iru kun viaj
servantoj sur la ŝipoj; sed Jehoŝafat ne konsentis. 50
Jehoŝafat ekdormis kun siaj patroj, kaj oni enterigis
lin kun liaj patroj en la urbo de lia patro David. Kaj
anstataŭ li ekreĝis lia filo Jehoram. 51 Aĥazja, filo
de Aĥab, fariĝis reĝo super Izrael en Samario en la
dek-sepa jaro de Jehoŝafat, reĝo de Judujo, kaj li reĝis
super Izrael du jarojn. 52 Li faradis malbonon antaŭ
la okuloj de la Eternulo, kaj iradis laŭ la vojo de sia
patro kaj de sia patrino, kaj laŭ la vojo de Jerobeam,
filo de Nebat, kiu pekigis Izraelon. 53 Kaj li servadis al

Baal kaj adorkliniĝadis al li, kaj incitadis la Eternulon,
Dion de Izrael, tute tiel, kiel faradis lia patro.

# 2 Reĝoj

1 Moab defalis de Izrael post la morto de Aĥab. 2 Kaj
Aĥazja elfalis tra la krado de sia supra ĉambro en
Samario, kaj malsaniĝis. Kaj li sendis senditojn, kaj
diris al ili: Iru, demandu Baal-Zebubon, la dion de
Ekron, ĉu mi resaniĝos de ĉi tiu malsano. 3 Sed anĝelo
de la Eternulo diris al Elija, la Teŝebano: Leviĝu, iru
renkonte al la senditoj de la reĝo de Samario, kaj diru
al ili: Ĉu ne ekzistas Dio en Izrael, ke vi iras demandi
Baal-Zebubon, la dion de Ekron? 4 Pro tio tiele diras la
Eternulo: De la lito, sur kiu vi kuŝiĝis, vi ne deiros, sed
vi mortos. Kaj Elija foriris. 5 Kiam la senditoj revenis
al li, li diris al ili: Kial vi revenis? 6 Kaj ili respondis al
li: Viro venis renkonte al ni, kaj diris al ni: Iru, revenu
al la reĝo, kiu sendis vin, kaj diru al li: Tiele diras la
Eternulo: Ĉu ne ekzistas Dio en Izrael, ke vi sendas
demandi Baal-Zebubon, la dion de Ekron? pro tio, de
la lito, sur kiu vi kuŝiĝis, vi ne deiros, sed vi mortos. 7
Kaj li diris al ili: Kia estas la aspekto de la viro, kiu
venis renkonte al vi kaj diris al vi tiujn vortojn? 8
Ili respondis al li: Li estas homo kovrita de haroj,
kaj ledan zonon li havas ĉirkaŭ siaj lumboj. Tiam li
diris: Tio estas Elija, la Teŝebano. 9 Kaj li sendis al li
kvindekestron kun lia kvindeko. Kaj tiu iris al li kaj
trovis lin sidanta sur la supro de monto, kaj diris al li:
Ho homo de Dio! la reĝo diris, ke vi malsupreniru.
10 Kaj Elija respondis kaj diris al la kvindekestro: Se
mi estas homo de Dio, tiam venu fajro el la ĉielo
kaj ekstermu vin kaj vian kvindekon. Kaj venis fajro
el la ĉielo kaj ekstermis lin kaj lian kvindekon. 11
Kaj li denove sendis al li alian kvindekestron kun lia
kvindeko. Kaj tiu ekparolis kaj diris al li: Ho homo
de Dio! tiele diras la reĝo: Malsupreniru rapide. 12
Kaj Elija respondis kaj diris al ili: Se mi estas homo
de Dio, tiam venu fajro el la ĉielo kaj ekstermu vin
kaj vian kvindekon. Kaj venis fajro de Dio el la ĉielo
kaj ekstermis lin kaj lian kvindekon. 13 Kaj li denove
sendis triafoje kvindekestron kun lia kvindeko. Kaj
la tria kvindekestro iris, kaj venis kaj fleksis siajn
genuojn antaŭ Elija, kaj ekpetegis lin kaj diris al li:
Ho homo de Dio! mia animo kaj la animo de ĉi tiuj
kvindek viaj servantoj havu do ian valoron antaŭ viaj
okuloj. 14 Jen venis fajro el la ĉielo kaj ekstermis la du
antaŭajn kvindekestrojn kaj iliajn kvindekojn; nun
mia animo havu ian valoron antaŭ viaj okuloj. 15
Tiam anĝelo de la Eternulo diris al Elija: Iru kun li,
ne timu lin. Kaj li leviĝis, kaj iris kun li al la reĝo. 16
Kaj li ekparolis al li: Tiele diras la Eternulo: Pro tio,
ke vi sendis senditojn, por demandi Baal-Zebubon,
la dion de Ekron, kvazaŭ ne ekzistus Dio en Izrael,
por demandi Lian vorton, tial de la lito, sur kiu vi
kuŝiĝis, vi ne deiros, sed vi mortos. 17 Kaj li mortis,
konforme al la vorto de la Eternulo, kiun eldiris Elija.
Kaj anstataŭ li ekreĝis Jehoram, en la dua jaro de
Jehoram, filo de Jehoŝafat, reĝo de Judujo; ĉar li ne
havis filon. 18 La cetera historio de Aĥazja, kion li
faris, estas priskribita en la libro de kroniko de la
reĝoj de Izrael.

2 Kiam la Eternulo volis levi Elijan en ventego en
la ĉielon, Elija estis iranta kun Eliŝa el Gilgal. 2
Kaj Elija diris al Eliŝa: Restu do ĉi tie, ĉar la Eternulo
sendas min al Bet-El. Sed Eliŝa diris: Mi ĵuras per la
Eternulo kaj per via animo, ke mi vin ne forlasos.
Kaj ili ekiris al Bet-El. 3 Kaj eliris la profetidoj, kiuj
estis en Bet-El, al Eliŝa, kaj diris al li: Ĉu vi scias, ke
hodiaŭ la Eternulo forprenos vian sinjoron de super
via kapo? Li diris: Mi ankaŭ scias, silentu. 4 Kaj Elija
diris al li: Eliŝa, restu do ĉi tie, ĉar la Eternulo sendas
min al Jeriĥo. Sed li diris: Mi ĵuras per la Eternulo kaj
per via animo, ke mi ne forlasos vin. Kaj ili venis en
Jeriĥon. 5 Kaj la profetidoj, kiuj estis en Jeriĥo, aliris
al Eliŝa, kaj diris al li: Ĉu vi scias, ke hodiaŭ la Eternulo
forprenos vian sinjoron de super via kapo? Li diris: Mi
ankaŭ scias, silentu. 6 Kaj Elija diris al li: Restu do ĉi
tie, ĉar la Eternulo sendas min al Jordan. Sed li diris:
Mi ĵuras per la Eternulo kaj per via animo, ke mi vin
ne forlasos. Kaj ili ambaŭ iris. 7 Kaj kvindek homoj el
la profetidoj iris kaj stariĝis malproksime kontraŭ
ili; sed ili ambaŭ staris ĉe Jordan. 8 Tiam Elija prenis
sian mantelon kaj kunvolvis ĝin, kaj frapis la akvon,
kaj ĝi dividiĝis duflanken, kaj ili ambaŭ trapasis sur
sekaĵo. 9 Kiam ili trapasis, Elija diris al Eliŝa: Petu,
kion mi faru al vi, antaŭ ol mi estos prenita for de vi.
Kaj Eliŝa diris: Duobla parto de via spirito estu do sur
mi. 10 Kaj tiu diris: Vi petas ion malfacilan; se vi vidos
min, kiam mi estos prenata for de vi, estos al vi tiel;
kaj se ne, tiam ne estos. 11 Dum ili estis irantaj kaj
parolantaj, subite aperis fajra ĉaro kaj fajraj ĉevaloj
kaj disigis ilin; kaj Elija en ventego suprenflugis en
la ĉielon. 12 Eliŝa vidis, kaj ekkriis: Mia patro, mia
patro, ĉaro de Izrael kaj liaj rajdistoj! Kaj li ne plu lin
vidis. Kaj li kaptis siajn vestojn kaj disŝiris ilin en du

pecojn. 13 Kaj li levis la mantelon de Elija, kiu defalis
de li, kaj reiris kaj stariĝis sur la bordo de Jordan. 14
Kaj li prenis la mantelon de Elija, kiu defalis de li,
kaj frapis la akvon, kaj diris: Kie estas la Eternulo,
Dio de Elija? Kaj li frapis la akvon, kaj ĝi dividiĝis
duflanken, kaj Eliŝa trapasis. 15 Kiam la profetidoj,
kiuj estis kontraŭe en Jeriĥo, lin ekvidis, ili diris: La
spirito de Elija transiris sur Eliŝan. Kaj ili iris al li
renkonte kaj adorkliniĝis antaŭ li ĝis la tero. 16 Kaj
ili diris al li: Jen kun viaj servantoj troviĝas kvindek
homoj, viroj fortaj; ili iru kaj serĉu vian sinjoron; eble
la spirito de la Eternulo forportis lin kaj ĵetis lin sur
unu el la montoj aŭ en unu el la valoj. Sed li diris: Ne
sendu. 17 Tamen ili insistis tiel longe, ĝis li hontis, kaj
li diris: Sendu. Kaj ili sendis kvindek homojn kaj serĉis
dum tri tagoj, sed ne trovis lin. 18 Kaj ili revenis al li,
dum li estis en Jeriĥo. Kaj li diris al ili: Mi diris ja al vi,
ke vi ne iru. 19 Kaj la loĝantoj de tiu urbo diris al Eliŝa:
Jen do la loĝado en ĉi tiu urbo estas bona, kiel nia
sinjoro vidas; sed la akvo estas malbona, kaj la tero
estas senfrukta. 20 Tiam li diris: Alportu al mi novan
pladon, kaj metu tien salon. Kaj oni alportis al li. 21
Kaj li eliris al la fonto de la akvo kaj ĵetis tien salon,
kaj diris: Tiele diras la Eternulo: Mi resanigas ĉi tiun
akvon, ĝi ne kaŭzos plu morton nek senfruktecon. 22
Kaj la akvo fariĝis sana ĝis la nuna tempo, konforme al
la vorto de Eliŝa, kiun li diris. 23 Kaj li foriris de tie en
Bet-Elon. Dum li estis iranta sur la vojo, malgrandaj
knaboj eliris el la urbo kaj mokis lin, kaj parolis al li:
Iru, kalvulo, iru, kalvulo! 24 Li returnis sin kaj ekvidis
ilin, kaj malbenis ilin en la nomo de la Eternulo. Kaj
eliris du ursinoj el la arbaro kaj disŝiris el ili kvardek
du infanojn. 25 Kaj li iris de tie al la monto Karmel,
kaj de tie li revenis en Samarion.

**3** Jehoram, filo de Aĥab, fariĝis reĝo super Izrael en
Samario en la dek-oka jaro de Jehoŝafat, reĝo de
Judujo, kaj li reĝis dek du jarojn. 2 Li faradis malbonon
antaŭ la okuloj de la Eternulo, tamen ne tiel, kiel lia
patro kaj lia patrino; li forigis la statuon de Baal, kiun
faris lia patro. 3 Tamen li restis aliĝinta al la pekoj de
Jerobeam, filo de Nebat, per kiuj li pekigis Izraelon; li
ne forlasis ilin. 4 Meŝa, reĝo de Moab, estis paŝtisto,
kaj li sendadis al la reĝo de Izrael po cent mil ŝafidoj
kaj cent mil virŝafoj kun ilia lano. 5 Sed kiam Aĥab
mortis, la reĝo de Moab defalis de la reĝo de Izrael. 6
Tiam la reĝo Jehoram eliris el Samario kaj revuis la
tutan Izraelon. 7 Kaj li iris kaj sendis al Jehoŝafat, reĝo
de Judujo, por diri: La reĝo de Moab defalis de mi; ĉu
vi iros kun mi milite kontraŭ Moabon? Tiu diris: Mi
iros; mi estas kiel vi, mia popolo kiel via popolo, miaj
ĉevaloj kiel viaj ĉevaloj. 8 Kaj li diris: Kiun vojon ni
iros? Kaj la alia diris: La vojon de la Edoma dezerto.
9 Tiam ekiris la reĝo de Izrael kaj la reĝo de Judujo
kaj la reĝo de Edom; sed kiam ili trairis vojon de
sep tagoj, ne estis akvo por la militistaro, nek por la
brutoj, kiuj sekvis ilin. 10 Kaj la reĝo de Izrael diris: Ho
ve! la Eternulo vokis ĉi tiujn tri reĝojn, por transdoni
ilin en la manojn de Moab. 11 Sed Jehoŝafat diris: Ĉu
ne troviĝas ĉi tie profeto de la Eternulo, por ke ni
demandu per li la Eternulon? Tiam respondis unu el
la servantoj de la reĝo de Izrael, kaj diris: Estas ĉi tie
Eliŝa, filo de Ŝafat, kiu verŝadis akvon sur la manojn de
Elija. 12 Kaj Jehoŝafat diris: Li posedas la vorton de la
Eternulo. Kaj iris al li la reĝo de Izrael kaj Jehoŝafat kaj
la reĝo de Edom. 13 Kaj Eliŝa diris al la reĝo de Izrael:
Kio komuna estas inter mi kaj vi? iru al la profetoj de
via patro kaj al la profetoj de via patrino. Sed la reĝo
de Izrael diris al li: Ne, ĉar la Eternulo vokis ĉi tiujn
tri reĝojn, por transdoni ilin en la manojn de Moab.
14 Tiam Eliŝa diris: Mi ĵuras per la Eternulo Cebaot,
antaŭ kiu mi staras, ke se mi ne estimus Jehoŝafaton,
reĝon de Judujo, mi ne ekrigardus vin kaj ne vidus
vin. 15 Nun alkonduku al mi muzikiston. Kaj kiam la
muzikisto ludis, estis sur li la mano de la Eternulo. 16
Kaj li diris: Tiele diras la Eternulo: Faru en ĉi tiu valo
multajn fosojn. 17 Ĉar tiele diras la Eternulo: Vi ne
vidos venton kaj vi ne vidos pluvon, kaj tamen ĉi tiu
valo pleniĝos de akvo, kaj vi trinkos, kaj ankaŭ viaj
apartenantoj kaj viaj brutoj. 18 Sed ĉi tio ne sufiĉos al
la Eternulo; Li transdonos ankaŭ Moabon en viajn
manojn. 19 Kaj vi venkobatos ĉiujn urbojn fortikigitajn
kaj ĉiujn urbojn distingindajn, kaj ĉiujn bonajn arbojn
vi faligos, kaj ĉiujn fontojn de akvo vi ŝtopos, kaj ĉiujn
bonajn kampojn vi malbonigos per ŝtonoj. 20 Kaj jen
matene, kiam oni alportas farunoferojn, subite venis
akvo per la vojo de Edom, kaj la tero pleniĝis de akvo.
21 Ĉiuj Moabidoj aŭdis, ke la reĝoj venis, por militi
kontraŭ ili, kaj ili kunvokis ĉiujn, kiuj povis komenci
porti zonon, kaj pli aĝajn, kaj stariĝis ĉe la limo.
22 Kiam ili leviĝis frue matene kaj la suno ekbrilis
super la akvo, al la Moabidoj de malproksime ŝajnis,
ke la akvo estas ruĝa kiel sango. 23 Kaj ili diris: Tio
estas sango! la reĝoj batalis inter si kaj ekstermis unu

alian; nun, Moab, iru preni rabakiron. 24 Ili venis al la
tendaro de Izrael. Tiam la Izraelidoj leviĝis kaj frapis
la Moabidojn, kaj ĉi tiuj forkuris de ili. Sed ili venis kaj
batis la Moabidojn. 25 Kaj la urbojn ili ruinigis, kaj sur
ĉiun bonan kampon ĉiu ĵetis ŝtonon tiel, ke ili plenigis
ilin, kaj ĉiujn fontojn de akvo ili ŝtopis, kaj ĉiun bonan
arbon ili faligis, ĝis restis nur ŝtonoj en Kir-Ĥareset.
Kaj ĉirkaŭis ĝin la ŝtonĵetistoj kaj ĝisfine frapis ĝin. 26
Kiam la reĝo de Moab vidis, ke la batalo lin venkas, li
prenis kun si sepcent virojn kun eltiritaj glavoj, por
trabati sin al la reĝo de Edom; sed ili ne povis. 27 Tiam
li prenis sian filon unuenaskitan, kiu estis reĝonta
anstataŭ li, kaj oferportis lin kiel bruloferon sur la
murego. Tiam la Izraelidoj forte indignis, kaj ili foriris
de li kaj reiris en sian landon.

**4** Unu virino el la edzinoj de la profetidoj plendis al
Eliŝa, dirante: Via servanto, mia edzo, mortis; kaj vi
scias, ke via servanto estis timanta la Eternulon; nun
la pruntedoninto venis, por preni miajn du infanojn
kiel sklavojn por si. 2 Kaj Eliŝa diris al ŝi: Kion mi
povas fari por vi? diru al mi, kion vi havas en la
domo? Ŝi respondis: Via servantino havas en la domo
nenion, krom kruĉeto kun oleo. 3 Tiam li diris: Iru,
petu al vi vazojn ekstere, de ĉiuj viaj najbaroj, vazojn
malplenajn, kolektu ne malmulte. 4 Kaj venu kaj ŝlosu
la pordon post vi kaj post viaj filoj, kaj enverŝu en
ĉiujn tiujn vazojn, kaj, pleniginte, forstarigu ilin. 5 Kaj
ŝi iris de li kaj ŝlosis la pordon post si kaj post siaj
filoj. Ili alportadis al ŝi, kaj ŝi verŝadis. 6 Kiam la vazoj
estis plenaj, ŝi diris al sia filo: Alportu al mi ankoraŭ
vazon. Sed li diris al ŝi: Ne estas plu vazo. Tiam la oleo
haltis. 7 Kaj ŝi venis kaj rakontis al la homo de Dio.
Kaj li diris al ŝi: Iru, vendu la oleon kaj pagu vian
ŝuldon, kaj vi kun viaj filoj vivos per la restaĵo. 8 Unu
tagon Eliŝa venis Ŝunemon; tie estis unu riĉa virino,
kiu retenis lin, ke li manĝu ĉe ŝi. Kaj ĉiufoje, kiam
li venis, li iradis tien, por manĝi. 9 Kaj ŝi diris al sia
edzo: Jen mi scias, ke li estas sankta homo de Dio, li,
kiu ĉiam preteriras antaŭ ni; 10 ni faru malgrandan
supran ĉambreton, kaj ni metu tien por li liton kaj
tablon kaj seĝon kaj lumingon, kaj ĉiufoje, kiam li
venos al ni, li tien iru. 11 Unu tagon li venis tien, kaj li
iris en la supran ĉambreton kaj kuŝiĝis tie. 12 Kaj li
diris al sia junulo Geĥazi: Alvoku tiun Ŝunemaninon.
Kaj tiu vokis ŝin, kaj ŝi aperis antaŭ li. 13 Kaj li diris al
li: Diru al ŝi: Jen vi prizorgis por ni ĉion ĉi tion; kion
mi povas fari por vi? ĉu vi bezonas ion diri al la reĝo
aŭ al la militestro? Sed ŝi respondis: Mi loĝas ja meze
de mia popolo. 14 Kaj li diris: Kion do ni povas fari por
ŝi? Tiam Geĥazi diris: Ho, ŝi ne havas filon, kaj ŝia
edzo estas maljuna. 15 Kaj li diris: Alvoku ŝin. Kaj li
vokis ŝin, kaj ŝi stariĝis ĉe la pordo. 16 Kaj li diris: Post
unu jaro en ĉi tiu tempo vi enbrakigos filon. Kaj ŝi
diris: Ne, mia sinjoro, homo de Dio, ne mensogu al via
servantino. 17 Sed la virino gravediĝis, kaj naskis filon
en la sekvanta jaro en la sama tempo, kiel diris al ŝi
Eliŝa. 18 La infano fariĝis granda. Unu tagon li iris al
sia patro, al la rikoltantoj. 19 Kaj li diris al sia patro:
Mia kapo, mia kapo! Kaj tiu diris al sia junulo: Portu
lin al lia patrino. 20 Kaj li prenis lin kaj alportis lin al
lia patrino; li sidis sur ŝiaj genuoj ĝis tagmezo, kaj
mortis. 21 Tiam ŝi iris kaj metis lin sur la liton de la
homo de Dio kaj ŝlosis post li kaj eliris. 22 Kaj ŝi vokis
sian edzon, kaj diris: Sendu al mi unu el la junuloj
kaj unu el la azeninoj, mi kuros al la homo de Dio
kaj revenos. 23 Li diris: Por kio vi iras al li? hodiaŭ
estas nek monatkomenco, nek sabato. Sed ŝi diris:
Estu trankvila. 24 Kaj ŝi selis la azeninon, kaj diris
al sia junulo: Konduku kaj iru, ne retenu min en la
rajdado, ĝis mi diros al vi. 25 Kaj ŝi iris kaj venis al la
homo de Dio, sur la monton Karmel. Kiam la homo de
Dio ŝin ekvidis de malproksime, li diris al sia junulo
Geĥazi: Jen estas tiu Ŝunemanino; 26 kuru do al ŝi
renkonte, kaj diru al ŝi: Kiel vi fartas? kiel fartas via
edzo? kiel fartas la infano? Ŝi diris: Ni fartas bone.
27 Kaj ŝi aliris al la homo de Dio sur la monton kaj
ekkaptis liajn piedojn. Geĥazi aliris, por forpuŝi ŝin;
sed la homo de Dio diris: Lasu ŝin, ĉar ŝia animo estas
afliktita; kaj la Eternulo kaŝis antaŭ mi kaj ne sciigis al
mi. 28 Kaj ŝi diris: Ĉu mi petis filon de mia sinjoro? ĉu
mi ne diris: Ne trompu min? 29 Kaj li diris al Geĥazi:
Zonu viajn lumbojn, kaj prenu en vian manon mian
bastonon kaj iru. Se vi renkontos iun, ne salutu lin;
kaj se iu vin salutos, ne respondu al li. Kaj metu mian
bastonon sur la vizaĝon de la knabo. 30 Sed la patrino
de la knabo diris: Mi ĵuras per la Eternulo kaj per via
animo, ke mi vin ne forlasos. Kaj li leviĝis, kaj iris
post ŝi. 31 Geĥazi iris antaŭ ili, kaj li metis la bastonon
sur la vizaĝon de la knabo; sed ne aperis voĉo nek
sento. Kaj li revenis renkonte al li, kaj sciigis al li,
dirante: La knabo ne vekiĝis. 32 Tiam Eliŝa eniris en la
domon, kaj vidis, ke la mortinta infano estas kuŝigita
sur lia lito. 33 Kaj li eniris kaj ŝlosis la pordon post ili

ambaŭ, kaj ekpreĝis al la Eternulo. 34 Kaj li iris kaj
kuŝiĝis sur la infano, kaj almetis sian buŝon al lia buŝo
kaj siajn okulojn al liaj okuloj kaj siajn manojn al liaj
manoj, kaj etendis sin sur li. Kaj la korpo de la infano
varmiĝis. 35 Kaj li releviĝis kaj iris en la domo tien kaj
reen, kaj venis kaj etendis sin sur la infano. Kaj la
knabo ternis sep fojojn, kaj la knabo malfermis siajn
okulojn. 36 Tiam li vokis Geĥazin, kaj diris: Alvoku
tiun Ŝunemaninon. Kaj li vokis ŝin, kaj ŝi venis al li,
kaj li diris: Prenu vian filon. 37 Kaj ŝi venis kaj ĵetis
sin al liaj piedoj kaj adorkliniĝis ĝis la tero; kaj ŝi
prenis sian filon kaj eliris. 38 Eliŝa reiris Gilgalon. Estis
malsato en la lando; kaj la profetidoj sidis antaŭ li.
Kaj li diris al sia junulo: Starigu la grandan kaldronon
kaj kuiru supon por la profetidoj. 39 Sed unu el ili
eliris sur la kampon, por kolekti verdaĵon; kaj li trovis
sovaĝan volvokreskaĵon kaj kolektis de ĝi kolocintojn,
plenan sian veston. Kaj li venis kaj tranĉis ilin en la
kaldronon kun la supo, ĉar ili ne sciis, kio tio estas.
40 Kaj ili elverŝis al la homoj, por manĝi. Sed kiam
tiuj ekmanĝis el la supo, ili ekkriis kaj diris: Morto
estas en la kaldrono, ho homo de Dio! Kaj ili ne povis
manĝi. 41 Tiam li diris: Alportu farunon. Kaj li enŝutis
en la kaldronon, kaj diris: Verŝu al la homoj, ke ili
manĝu. Kaj jam estis nenio malbona en la kaldrono.
42 Venis homo el Baal-Ŝaliŝa, kaj alportis al la homo
de Dio unuaaĵon de pano: dudek hordeajn panojn kaj
freŝajn grajnojn en sia saketo. Kaj ĉi tiu diris: Donu al
la homoj, ke ili manĝu. 43 Lia servanto diris: Kiel mi
povas tion doni al cent homoj? Sed li diris: Donu al la
homoj, ke ili manĝu; ĉar tiele diras la Eternulo: Oni
manĝos, kaj ankoraŭ iom restos. 44 Kaj li donis al ili,
kaj ili manĝis, kaj iom ankoraŭ restis, konforme al la
vorto de la Eternulo.

5 Naaman, la militestro de la reĝo de Sirio, estis
granda homo antaŭ sia sinjoro kaj tre estimata,
ĉar per li la Eternulo donis venkon al Sirio. Tiu homo
estis forta militisto, sed leprulo. 2 La Sirianoj unu
fojon eliris taĉmente kaj kaptis el la Izraela lando
malgrandan knabinon, kaj ŝi fariĝis servantino de la
edzino de Naaman. 3 Kaj ŝi diris al sia sinjorino: Ho, se
mia sinjoro estus ĉe la profeto, kiu loĝas en Samario!
tiu forigus de li la lepron. 4 Kaj iu iris kaj rakontis al
sia sinjoro, dirante: Tiel kaj tiel diris la knabino, kiu
estas el la lando Izraela. 5 Kaj la reĝo de Sirio diris:
Iru, kaj mi sendos leteron al la reĝo de Izrael. Kaj li
iris, kaj li prenis kun si dek kikarojn da arĝento kaj ses
mil siklojn da oro kaj dek kompletojn da vestoj. 6 Kaj
li alportis al la reĝo de Izrael la leteron, en kiu estis
skribite: Kune kun ĉi tiu letero mi sendas al vi mian
servanton Naaman, por ke vi liberigu lin de lia lepro.
7 Kiam la reĝo de Izrael tralegis la leteron, li disŝiris
siajn vestojn, kaj diris: Ĉu mi estas Dio, por mortigi kaj
vivigi, ke tiu sendas al mi, por ke mi liberigu homon
de lia lepro? nun sciu kaj vidu, ke li serĉas pretekston
kontraŭ mi. 8 Kiam Eliŝa, la homo de Dio, aŭdis, ke
la reĝo de Izrael disŝiris siajn vestojn, li sendis al la
reĝo, por diri: Kial vi disŝiris viajn vestojn? li venu
al mi, kaj li ekscios, ke ekzistas profeto en Izrael. 9
Kaj venis Naaman kun siaj ĉevaloj kaj ĉaroj, kaj haltis
ĉe la pordo de la domo de Eliŝa. 10 Kaj Eliŝa sendis
al li senditon, por diri: Iru kaj lavu vin sep fojojn en
Jordan, kaj renoviĝos via korpo kaj vi fariĝos pura. 11
Tiam Naaman ekkoleris kaj foriris, kaj diris: Jen mi
pensis, ke li eliros kaj stariĝos, kaj alvokos la nomon
de la Eternulo, sia Dio, kaj metos sian manon sur la
lokon kaj forigos la lepron. 12 Ĉu Amana kaj Parpar, la
riveroj de Damasko, ne estas pli bonaj, ol ĉiuj akvoj de
Izrael? ĉu mi ne povas lavi min en ili kaj fariĝi pura?
Kaj li forturnis sin kaj foriris kun kolero. 13 Sed liaj
servantoj aliris, kaj ekparolis al li, kaj diris: Nia patro!
se ion grandan la profeto ordonus al vi, ĉu vi tion ne
farus? des pli, se li diris al vi: Lavu vin, kaj vi estos
pura! 14 Kaj li iris kaj enakvigis sin en Jordan sep
fojojn, konforme al la vorto de la homo de Dio; kaj lia
korpo renoviĝis kiel la korpo de malgranda infano,
kaj li fariĝis pura. 15 Kaj li revenis al la homo de Dio,
li kaj lia tuta akompanantaro, kaj li venis kaj stariĝis
antaŭ li, kaj diris: Nun mi eksciis, ke sur la tuta tero
ne ekzistas Dio krom ĉe Izrael; prenu do nun donacon
de via servanto. 16 Sed tiu diris: Kiel vivas la Eternulo,
antaŭ kiu mi staras, mi ne prenos. Li insistis ĉe li, ke li
prenu, sed tiu ne volis. 17 Tiam Naaman diris: Se ne,
tiam mi petas, oni donu al via servanto tiom da tero,
kiom povas porti paro da muloj; ĉar via servanto ne
alportados plu bruloferojn nek buĉoferojn al aliaj dioj
krom la Eternulo. 18 Nur en jena afero la Eternulo
pardonu vian servanton: kiam mia sinjoro iros en la
templon de Rimon, por tie adorkliniĝi, kaj li apogos
sin sur mia brako kaj mi adorkliniĝos en la templo de
Rimon, tiam la Eternulo pardonu vian servanton pri
tiu afero. 19 Tiu diris al li: Iru en paco. Kaj kiam li
foriris de li certan spacon da tero, 20 Geĥazi, la junulo

de Eliŝa, de la homo de Dio, diris al si: Jen mia sinjoro
domaĝis la Sirianon Naaman, kaj ne prenis el lia mano
tion, kion tiu alportis; kiel vivas la Eternulo, mi kuros
post li kaj prenos ion de li. 21 Kaj Geĥazi postkuris
Naamanon. Kiam Naaman vidis, ke li kuras post li, li
desaltis de la ĉaro renkonte al li, kaj diris: Ĉu la farto
estas bona? 22 Tiu respondis: Bona; mia sinjoro sendis
min, por diri: Jen nun venis al mi de la monto de
Efraim du junuloj el la profetidoj; donu por ili, mi
petas, kikaron da arĝento kaj du kompletojn da vestoj.
23 Kaj Naaman diris: Pli bone prenu du kikarojn. Kaj li
insistis ĉe li, kaj ligis du kikarojn da arĝento en du
paketoj kaj du kompletojn da vestoj kaj donis al siaj
du junuloj, kaj ili portis antaŭ li. 24 Kiam li venis al la
monteto, li prenis el iliaj manoj kaj kaŝis en la domo.
Kaj li forliberigis la homojn, kaj ili foriris. 25 Kiam li
venis kaj aperis antaŭ sia sinjoro, Eliŝa diris al li: De
kie vi venas, Geĥazi? Ĉi tiu respondis: Via servanto
nenien iris. 26 Sed tiu diris al li: Mia koro ne forestis,
kiam la homo returnis sin de sia ĉaro renkonte al
vi. Ĉu nun estas la tempo, por preni arĝenton aŭ
preni vestojn aŭ olivarbojn, vinberĝardenojn, ŝafojn,
bovojn, sklavojn, aŭ sklavinojn? 27 La lepro de Naaman
aliĝu do al vi kaj al via idaro por eterne. Kaj tiu foriris
de li, leprokovrita kiel neĝo.

6 La profetidoj diris al Eliŝa: Jen la loko, kie ni loĝas
ĉe vi, estas tro malvasta por ni; 2 ni iru do al
Jordan, kaj ni prenu de tie ĉiu po unu trabo, kaj ni
aranĝu al ni tie lokon, por tie loĝi. Li diris: Iru. 3 Kaj
unu el ili diris: Volu vi ankaŭ iri kun viaj servantoj.
Kaj li diris: Mi iros. 4 Kaj li iris kun ili. Kaj ili venis
al Jordan kaj hakis arbojn. 5 Kiam unu el ili faligis
arbon, la hakilo falis en la akvon. Kaj li ekkriis kaj
diris: Ho ve, mia sinjoro! ĝi estas ja prunteprenita! 6
Kaj la homo de Dio diris: Kien ĝi falis? Tiu montris
al li la lokon. Kaj li dehakis lignon kaj ĵetis tien, kaj
la hakilo suprennaĝis. 7 Kaj li diris: Levu ĝin. Tiu
etendis sian manon kaj prenis. 8 La reĝo de Sirio
komencis militon kontraŭ Izrael, kaj konsiliĝis kun
siaj servantoj, dirante: Tie kaj tie mi stariĝos tendare.
9 Tiam la homo de Dio sendis al la reĝo de Izrael, por
diri: Gardu vin, ke vi ne trapasu tiun lokon, ĉar tie
staras la Sirianoj. 10 Kaj la reĝo de Izrael sendis al
la loko, pri kiu diris al li la homo de Dio kaj avertis
lin, kaj li tie antaŭgardis sin ne unu kaj ne du fojojn.
11 Maltrankviliĝis la koro de la reĝo de Sirio pro tiu
afero; kaj li alvokis siajn servantojn, kaj diris al ili:
Ĉu vi ne diros al mi, kiu el ni estas en rilatoj kun la
reĝo de Izrael? 12 Tiam diris unu el liaj servantoj: Ne,
mia sinjoro, ho reĝo! sed la profeto Eliŝa, kiu estas en
Izrael, raportas al la reĝo de Izrael eĉ tiujn vortojn,
kiujn vi parolas en via dormoĉambro. 13 Kaj li diris:
Iru kaj rigardu, kie li estas, tiam mi sendos kaj prenos
lin. Kaj oni sciigis al li, dirante: Jen li estas en Dotan.
14 Tiam li sendis tien ĉevalojn kaj ĉarojn kaj grandan
militistaron. Ili venis en nokto kaj ĉirkaŭis la urbon.
15 Kiam la servanto de la homo de Dio frue matene
leviĝis kaj eliris, jen militistaro ĉirkaŭas la urbon kun
ĉevaloj kaj ĉaroj. Kaj lia servanto diris al li: Ho ve,
mia sinjoro! kion ni faros? 16 Sed li diris: Ne timu;
ĉar pli multaj estas tiuj, kiuj estas kun ni, ol tiuj,
kiuj estas kun ili. 17 Kaj Eliŝa ekpreĝis kaj diris: Ho
Eternulo, malfermu liajn okulojn, por ke li vidu. Kaj
la Eternulo malfermis la okulojn de la junulo, kaj li
ekvidis, ke la tuta monto estas plena de fajraj ĉevaloj
kaj ĉaroj ĉirkaŭ Eliŝa. 18 La Sirianoj venis al li. Tiam
Eliŝa ekpreĝis al la Eternulo kaj diris: Frapu ĉi tiun
popolon per blindeco. Kaj Li frapis ilin per blindeco,
konforme al la vorto de Eliŝa. 19 Kaj Eliŝa diris al ili: Ĝi
estas ne tiu vojo kaj ne tiu urbo; sekvu min, kaj mi
kondukos vin al tiu viro, kiun vi serĉas. Kaj li kondukis
ilin en Samarion. 20 Kiam ili venis en Samarion, Eliŝa
diris: Ho Eternulo, malfermu iliajn okulojn, por ke ili
vidu. Kaj la Eternulo malfermis iliajn okulojn, kaj ili
ekvidis, ke ili estas meze de Samario. 21 Kaj la reĝo
de Izrael diris al Eliŝa, kiam li ekvidis ilin: Ĉu mi ne
mortigu ilin? ĉu mi ne mortigu ilin, mia patro? 22
Sed li diris: Ne mortigu; ĉu vi mortigas tiujn, kiujn vi
kaptis per via glavo kaj per via pafarko? metu antaŭ
ilin panon kaj akvon; ili manĝu kaj trinku, kaj ili iru al
sia sinjoro. 23 Kaj li faris por ili grandan tagmanĝon,
kaj ili manĝis kaj trinkis, kaj poste li ilin forliberigis,
kaj ili iris al sia sinjoro. Ne venis plu taĉmentoj de
Sirianoj en la landon de Izrael. 24 Post tio Ben-Hadad,
reĝo de Sirio, kolektis sian tutan militistaron, kaj iris
kaj eksieĝis Samarion. 25 Estis granda malsato en
Samario. Kaj ili sieĝis ĝin tiel longe, ĝis kapo de azeno
ricevis la prezon de okdek sikloj, kaj kvarono de kab'o
da sterko de kolomboj la prezon de kvin sikloj. 26
Unu fojon la reĝo de Izrael iris sur la murego, kaj iu
virino ekkriis al li, dirante: Helpu, mia sinjoro, ho
reĝo! 27 Li respondis: Se la Eternulo vin ne helpas,
el kio do mi vin helpos? ĉu el la draŝejo aŭ ĉu el la

vinpremejo? 28 Kaj la reĝo diris al ŝi: Kio estas al vi?
Ŝi respondis: Ĉi tiu virino diris al mi: Donu vian filon,
por ke ni manĝu lin hodiaŭ, kaj mian filon ni manĝos
morgaŭ. 29 Kaj ni kuiris mian filon kaj formanĝis lin;
sed kiam mi diris al ŝi la sekvantan tagon: Donu vian
filon, por ke ni lin manĝu, ŝi kaŝis sian filon. 30 Kiam
la reĝo aŭdis la vortojn de la virino, li disŝiris siajn
vestojn, irante sur la muro; kaj la popolo vidis, ke
subveste sur lia korpo estas sakaĵo. 31 Kaj li diris: Tion
kaj pli faru al mi la Eternulo, se la kapo de Eliŝa, filo
de Ŝafat, restos sur li hodiaŭ. 32 Dume Eliŝa sidis en
sia domo, kaj la plejaĝuloj estis ĉe li. La reĝo sendis
de si homon. Antaŭ ol la sendito venis al li, li diris
al la plejaĝuloj: Ĉu vi vidas, ke tiu filo de mortigisto
sendis, por depreni mian kapon? rigardu, kiam venos
la sendito, fermu la pordon kaj forpuŝu lin per la
pordo; la sono de la piedoj de lia sinjoro aŭdiĝas post
li. 33 Dum li estis ankoraŭ parolanta kun ili, jen la
sendito venis al li; kaj li diris: Jen tia malbono venas
de la Eternulo! kion mi ankoraŭ povas atendi de la
Eternulo?

7 Tiam diris Eliŝa: Aŭskultu la vorton de la Eternulo:
tiele diras la Eternulo: Morgaŭ en ĉi tiu tempo
mezuro da delikata faruno havos la prezon de unu
siklo, kaj du mezuroj da hordeo la prezon de unu
siklo, ĉe la pordego de Samario. 2 Kaj respondis la
altrangulo, sur kies brako la reĝo sin apogadis, al
la homo de Dio, kaj diris: Eĉ se la Eternulo faros
fenestrojn en la ĉielo, ĉu tio povas fariĝi? Kaj tiu diris:
Vi vidos tion per viaj okuloj, sed vi ne manĝos de tio.
3 Kvar homoj lepruloj estis ĉe la enirejo de la pordego.
Kaj ili diris unu al la alia: Kial ni sidas ĉi tie, ĝis ni
mortos? 4 Se ni decidos eniri en la urbon, en la urbo
estas ja malsato, kaj ni tie mortos; se ni sidos ĉi tie, ni
ankaŭ mortos; ni iru do kaj ĵetu nin en la tendaron de
la Sirianoj. Se ili lasos nin vivantaj, ni vivos; kaj se ili
mortigos nin, ni mortos. 5 Kaj ili leviĝis en krepusko,
por iri en la tendaron de la Sirianoj. Ili venis al la
rando de la tendaro de la Sirianoj, kaj jen neniu tie
estas. 6 La Sinjoro aŭdigis al la tendaro de la Sirianoj
la sonon de ĉaroj kaj la sonon de ĉevaloj, la sonon de
granda militistaro. Kaj ili diris unu al la alia: Certe la
reĝo de Izrael dungis kontraŭ ni la reĝojn de la Ĥetidoj
kaj la reĝojn de la Egiptoj, ke ili iru kontraŭ nin. 7
Kaj ili leviĝis kaj forkuris en la krepusko, kaj restigis
siajn tendojn kaj siajn ĉevalojn kaj siajn azenojn, la
tutan tendaron, kia ĝi estis, kaj ili forkuris, por savi
sian vivon. 8 Kaj tiuj lepruloj venis al la rando de la
tendaro, kaj ili eniris en unu tendon kaj manĝis kaj
trinkis, kaj prenis de tie arĝenton kaj oron kaj vestojn,
kaj iris kaj kaŝis; kaj ili venis denove, kaj eniris en
alian tendon kaj prenis de tie, kaj iris kaj kaŝis. 9 Kaj
ili diris unu al la alia: Ne ĝuste ni agas; la hodiaŭa tago
estas tago de bona sciigo; se ni silentos kaj atendos
ĝis la lumo de la mateno, ni montriĝos kulpaj. Ni iru
do, por ke ni venu kaj sciigu al la domo de la reĝo. 10
Kaj ili venis, kaj vokis al la pordegistoj de la urbo, kaj
raportis al ili, dirante: Ni venis en la tendaron de la
Sirianoj, kaj ni konvinkiĝis, ke tie estas neniu homo
nek voĉo de homo, sed nur ĉevaloj alligitaj kaj azenoj
alligitaj kaj tendoj en sia ordinara stato. 11 Kaj la
pordegistoj vokis kaj raportis internen, en la domon
de la reĝo. 12 Tiam la reĝo leviĝis en la nokto, kaj
diris al siaj servantoj: Mi diros al vi, kion faris al ni la
Sirianoj. Ili scias, ke ni suferas malsaton, kaj ili eliris
el la tendaro, por kaŝi sin sur la kampo, pensante:
Kiam ili eliros el la urbo, ni kaptos ilin vivantajn, kaj
ni eniros en la urbon. 13 Sed unu el liaj servantoj
respondis kaj diris: Oni prenu do kvin el la restintaj
ĉevaloj, kiuj restis en la urbo (estos al ili kiel al la tuta
multo da Izraelidoj, kiuj restis en la urbo, aŭ kiel al la
tuta multo da Izraelidoj, kiuj pereis); kaj ni sendu kaj
vidu. 14 Kaj oni prenis du ĉarojn kun ĉevaloj; kaj la
reĝo sendis post la militistaro de la Sirianoj, dirante:
Iru kaj rigardu. 15 Kaj ili iris post ili ĝis Jordan, kaj
vidis, ke la tuta vojo estas plena de vestoj kaj uzataĵoj,
kiujn la Sirianoj ĵetis ĉe sia rapidado. Kaj la senditoj
revenis kaj raportis al la reĝo. 16 Tiam la popolo eliris,
kaj disrabis la tendaron de la Sirianoj. Kaj la prezo de
mezuro da delikata faruno fariĝis unu siklo, kaj de du
mezuroj da hordeo unu siklo, konforme al la vorto de
la Eternulo. 17 La reĝo donis al la altrangulo, sur kies
brako li sin apogadis, postenon ĉe la pordego; kaj la
popolo dispremis lin per la piedoj ĉe la pordego, kaj li
mortis, kiel diris la homo de Dio, kion li parolis, kiam
la reĝo venis al li. 18 Kiam la homo de Dio parolis al la
reĝo, dirante: Du mezuroj da hordeo havos la prezon
de unu siklo, kaj unu mezuro da delikata faruno la
prezon de unu siklo, morgaŭ en ĉi tiu tempo ĉe la
pordego de Samario: 19 tiam la altrangulo respondis
al la homo de Dio kaj diris: Eĉ se la Eternulo faros
fenestrojn en la ĉielo, ĉu tio povas fariĝi? Kaj li diris:
Vi vidos per viaj okuloj, sed vi ne manĝos de tio. 20

Kaj tiel fariĝis al li; la popolo dispremis lin per la
piedoj ĉe la pordego, kaj li mortis.

**8** Eliŝa diris al la virino, kies filon li revivigis, jene:
Leviĝu kaj iru, vi kaj via domo, kaj loĝu kelkan
tempon tie, kie vi povos loĝi; ĉar la Eternulo alvokos
malsaton, kaj ĝi venos en la landon por sep jaroj. **2**
Kaj la virino leviĝis kaj faris laŭ la vorto de la homo
de Dio, kaj ŝi iris, ŝi kaj ŝia domo, kaj loĝis en la lando
de la Filiŝtoj sep jarojn. **3** Post la paso de la sep jaroj
la virino revenis el la lando de la Filiŝtoj, kaj ŝi iris,
por klopodi ĉe la reĝo pri sia domo kaj pri sia kampo.
**4** La reĝo tiam parolis kun Geĥazi, la junulo de la
homo de Dio, dirante: Rakontu al mi ĉiujn grandajn
farojn, kiujn faris Eliŝa. **5** Dum li estis rakontanta al la
reĝo, ke tiu revivigis mortinton, jen la virino, kies
filon li revivigis, ekpetis la reĝon pri sia domo kaj
pri sia kampo. Kaj Geĥazi diris: Mia sinjoro, ho reĝo,
jen estas tiu virino, kaj jen estas ŝia filo, kiun Eliŝa
revivigis. **6** Kaj la reĝo demandis la virinon, kaj ŝi
rakontis al li. Kaj la reĝo donis al ŝi unu korteganon,
dirante: Redonu al ŝi ĉion, kio apartenas al ŝi, kaj
ĉiujn enspezojn de la kampo de post la tago, kiam ŝi
forlasis la landon, ĝis nun. **7** Eliŝa venis en Damaskon.
Ben-Hadad, reĝo de Sirio, tiam estis malsana. Kaj
oni raportis al li, dirante: La homo de Dio venis ĉi
tien. **8** Tiam la reĝo diris al Ĥazael: Prenu en vian
manon donacon, kaj iru renkonte al la homo de Dio,
kaj demandu per li la Eternulon, ĉu mi resaniĝos de
ĉi tiu malsano. **9** Kaj Ĥazael iris renkonte al li, kaj
prenis donacon en sian manon kaj da ĉio plej bona en
Damasko tiom, kiom povas porti kvardek kameloj, kaj
li venis kaj stariĝis antaŭ li, kaj diris: Via filo Ben-
Hadad, reĝo de Sirio, sendis min al vi, por demandi:
Ĉu mi resaniĝos de ĉi tiu malsano? **10** Kaj Eliŝa diris al
li: Iru, diru al li: Vi resaniĝos. Sed la Eternulo montris
al mi, ke li mortos. **11** Kaj li fikse rigardis lin, ĝis li
hontiĝis, kaj la homo de Dio ploris. **12** Ĥazael diris: Kial
mia sinjoro ploras? Tiu respondis: Ĉar mi scias, kian
malbonon vi faros al la Izraelidoj: iliajn fortikaĵojn
vi forbruligos, iliajn junulojn vi mortigos per glavo,
iliajn suĉinfanojn vi frakasos, kaj iliajn gravedulinojn
vi disfendos. **13** Ĥazael diris: Kio estas via servanto, la
hundo, ke li faru tiun grandan faron? Kaj Eliŝa diris:
La Eternulo montris al mi, ke vi estos reĝo de Sirio. **14**
Li foriris de Eliŝa kaj venis al sia sinjoro. Ĉi tiu diris al
li: Kion diris al vi Eliŝa? Kaj li respondis: Li diris al mi,
ke vi resaniĝos. **15** Sed la sekvantan tagon li prenis la
litkovrilon, kaj trempis ĝin en akvo kaj etendis ĝin
sur lia vizaĝo, kaj li mortis. Kaj anstataŭ li ekreĝis
Ĥazael. **16** En la kvina jaro de Joram, filo de Aĥab,
reĝo de Izrael, post Jehoŝafat, reĝo de Judujo, ekreĝis
Jehoram, filo de Jehoŝafat, reĝo de Judujo. **17** Li havis
la aĝon de tridek du jaroj, kiam li fariĝis reĝo, kaj ok
jarojn li reĝis en Jerusalem. **18** Li iradis laŭ la vojo de
la reĝoj de Izrael, kiel faris la domo de Aĥab, ĉar filino
de Aĥab estis lia edzino, kaj li faradis malbonon antaŭ
la Eternulo. **19** Tamen la Eternulo ne volis pereigi
Judujon, pro Sia servanto David, ĉar Li promesis al li
doni lumilon al li kaj al liaj filoj por ĉiam. **20** En lia
tempo la Edomidoj defalis de Judujo kaj starigis super
si reĝon. **21** Joram iris Cairon kune kun ĉiuj siaj ĉaroj;
kaj li leviĝis nokte, kaj venkobatis la Edomidojn, kiuj
estis ĉirkaŭ li, kaj la ĉarestrojn; kaj la popolo forkuris
al siaj tendoj. **22** Tamen la Edomidoj restis defalintaj
de Judujo ĝis la nuna tago. Tiam defalis ankaŭ Libna
en la sama tempo. **23** La cetera historio de Joram,
kaj ĉio, kion li faris, estas priskribitaj en la libro de
kroniko de la reĝoj de Judujo. **24** Kaj Joram ekdormis
kun siaj patroj, kaj oni enterigis lin kun liaj patroj en
la urbo de David. Kaj anstataŭ li ekreĝis lia filo Aĥazja.
**25** En la dek-dua jaro de Joram, filo de Aĥab, reĝo de
Izrael, ekreĝis Aĥazja, filo de Jehoram, reĝo de Judujo.
**26** La aĝon de dudek du jaroj havis Aĥazja, kiam li
fariĝis reĝo, kaj unu jaron li reĝis en Jerusalem. La
nomo de lia patrino estis Atalja, filino de Omri, reĝo
de Izrael. **27** Kaj li iradis laŭ la vojo de la domo de
Aĥab, kaj faradis malbonon antaŭ la Eternulo, kiel
la domo de Aĥab, ĉar li estis boparenco de la domo
de Aĥab. **28** Li iris kun Joram, filo de Aĥab, milite
kontraŭ Ĥazaelon, reĝon de Sirio, al Ramot en Gilead;
kaj la Sirianoj vundis Joramon. **29** Kaj la reĝo Joram
revenis, por kuraci sin en Jizreel de la vundoj, kiujn
faris al li la Sirianoj en Ramot, kiam li batalis kontraŭ
Ĥazael, reĝo de Sirio. Kaj Aĥazja, filo de Jehoram, reĝo
de Judujo, iris, por viziti Joramon, filon de Aĥab, en
Jizreel, ĉar ĉi tiu estis malsana.

**9** La profeto Eliŝa alvokis unu el la profetidoj, kaj
diris al li: Zonu viajn lumbojn, kaj prenu en vian
manon ĉi tiun vazon kun oleo, kaj iru en Ramoton
en Gilead. **2** Kiam vi venos tien, elserĉu tie Jehun,
filon de Jehoŝafat, filo de Nimŝi, kaj aliru kaj starigu
lin el meze de liaj fratoj kaj enkonduku lin en la

plej internan ĉambron. 3 Kaj prenu la vazon kun la
oleo kaj verŝu sur lian kapon, kaj diru: Tiele diras la
Eternulo: Mi sanktoleis vin reĝo super Izrael. Poste
malfermu la pordon kaj forkuru, ne prokrastu. 4 Kaj
iris la junulo, la junulo la profeto, al Ramot en Gilead.
5 Kiam li venis, li vidis, ke sidas la militestroj. Kaj li
diris: Mi havas ion por diri al vi, ho estro. Kaj Jehu
diris: Al kiu el ni ĉiuj? Li respondis: Al vi, ho estro. 6
Tiu leviĝis kaj iris en la domon. Li verŝis la oleon sur
lian kapon, kaj diris: Tiele diras la Eternulo, Dio de
Izrael: Mi sanktoleis vin reĝo super la popolo de la
Eternulo, super Izrael. 7 Kaj vi ekstermos la domon de
via sinjoro Aĥab, por ke Mi venĝu la sangon de Miaj
servantoj, la profetoj, kaj la sangon de ĉiuj servantoj
de la Eternulo, verŝitajn de la mano de Izebel. 8 Kaj
pereos la tuta domo de Aĥab; kaj Mi ekstermos ĉe
Aĥab ĉiun virseksulon, malliberulon kaj liberulon en
Izrael. 9 Kaj mi faros al la domo de Aĥab kiel al la
domo de Jerobeam, filo de Nebat, kaj kiel al la domo
de Baaŝa, filo de Aĥija. 10 Kaj Izebelon manĝos la
hundoj sur la kampo de Jizreel, kaj neniu enterigos
ŝin. Kaj li malfermis la pordon kaj forkuris. 11 Kiam
Jehu eliris al la servantoj de sia sinjoro, ili diris al li:
Ĉu ĉio estas en ordo? por kio venis al vi tiu frenezulo?
Li respondis al ili: Vi konas ja tiun homon kaj lian
parolon. 12 Ili diris: Ne vero, tamen diru al ni. Kaj li
diris: Tiel kaj tiel li parolis al mi, dirante: Tiele diras
la Eternulo: Mi sanktoleis vin reĝo super Izrael. 13 Kaj
rapide ili prenis ĉiu sian veston kaj sternis sub li sur la
altaj ŝtupoj, kaj ekblovis per trumpeto, kaj diris: Jehu
fariĝis reĝo. 14 Tiam Jehu, filo de Jehoŝafat, filo de
Nimŝi, faris konspiron kontraŭ Joram. (Dume Joram
staris garde en Ramot en Gilead, li kaj la tuta Izrael,
kontraŭ Ĥazael, reĝo de Sirio. 15 Kaj la reĝo Joram
revenis, por kuraci sin en Jizreel de la vundoj, kiujn
faris al li la Sirianoj, kiam li batalis kontraŭ Ĥazael,
reĝo de Sirio.) Tiam Jehu diris: Se vi konsentas, neniu
eliĝu el la urbo, por iri kaj sciigi en Jizreel. 16 Kaj Jehu
ekrajdis kaj direktis sin al Jizreel; ĉar tie kuŝis Joram,
kaj Aĥazja, reĝo de Judujo, venis, por viziti Joramon.
17 La gardostaranto staris sur la turo en Jizreel, kaj li
ekvidis la alproksimiĝantan amason de Jehu, kaj diris:
Mi vidas amason. Tiam Joram diris: Prenu rajdanton
kaj sendu kontraŭ ili, por ke li demandu, ĉu ĉio estas
en ordo. 18 Kaj la rajdanto sur ĉevalo direktis sin
renkonte al li, kaj diris: Tiele diras la reĝo: Ĉu ĉio estas
en ordo? Sed Jehu respondis: La ordo ne estas via
afero, turnu vin kaj sekvu min. Kaj la gardostaranto
raportis, dirante: La sendito venis al ili, sed ne revenis.
19 Tiam li sendis duan rajdanton, kaj ĉi tiu venis al ili,
kaj diris: Tiele diras la reĝo: Ĉu ĉio estas en ordo?
Jehu respondis: La ordo ne estas via afero, turnu vin
kaj sekvu min. 20 La gardostaranto raportis, dirante:
Li venis al ili, sed ne revenis; la kondukado estas kiel
kondukado de Jehu, filo de Nimŝi, ĉar li kondukas
rapidege. 21 Tiam Joram diris: Oni jungu! Kaj oni
jungis lian ĉaron. Kaj eliris Joram, reĝo de Izrael, kaj
Aĥazja, reĝo de Judujo, ĉiu sur sia ĉaro, kaj ili direktis
sin renkonte al Jehu, kaj ili renkontis lin sur la kampo
de Nabot, la Jizreelano. 22 Kiam Joram ekvidis Jehun, li
diris: Ĉu ĉio estas en ordo, Jehu? Sed tiu respondis: Kia
ordo povas esti ĉe la malĉastado de via patrino Izebel
kaj ĉe ŝiaj multaj sorĉaĵoj? 23 Tiam Joram turnis sian
manon kaj forkuris, kaj diris al Aĥazja: Perfido, ho
Aĥazja! 24 Sed Jehu streĉis per sia mano la pafarkon
kaj pafe frapis Joramon inter liaj brakoj, kaj la sago
iris tra lian koron, kaj li falis genue sur sia ĉaro. 25 Kaj
Jehu diris al sia altrangulo Bidkar: Prenu kaj ĵetu lin
sur la kampon de Nabot, la Jizreelano; ĉar rememoru,
kiel mi kaj vi sur ĉaro veturis post lia patro Aĥab kaj
la Eternulo eldiris pri li jenan profetaĵon: 26 Vere,
diris la Eternulo, la sangon de Nabot kaj la sangon
de liaj filoj Mi vidis hieraŭ, kaj Mi venĝos al vi sur
ĉi tiu kampo, diris la Eternulo. Prenu do nun kaj
ĵetu lin sur la kampon, konforme al la vorto de la
Eternulo. 27 Kiam Aĥazja, reĝo de Judujo, tion vidis, li
forkuris en la direkto al la ĝardena domo. Sed Jehu
postkuris lin, kaj diris: Lin ankaŭ batu sur la ĉaro. Kaj
oni frapis lin sur la altaĵo Gur, kiu estas apud Jibleam.
Kaj li forkuris en Megidon kaj mortis tie. 28 Kaj liaj
servantoj forveturigis lin en Jerusalemon kaj enterigis
lin en lia tombo kun liaj patroj en la urbo de David. 29
En la jaro dek-unua de Joram, filo de Aĥab, Aĥazja
ekreĝis super Judujo. 30 Jehu venis al Jizreel. Kiam
Izebel tion aŭdis, ŝi kolorigis siajn okulojn kaj beligis
sian kapon kaj ekrigardis tra la fenestro. 31 Kiam Jehu
eniris en la pordegon, ŝi diris: Ĉu nun estos paco, ho
Zimri, mortiginto de sia sinjoro? 32 Tiam li levis sian
vizaĝon al la fenestro, kaj diris: Kiu estas kun mi? kiu?
Kaj ekrigardis al li du aŭ tri korteganoj. 33 Kaj li diris:
Elĵetu ŝin! Kaj ili ŝin elĵetis. Kaj ŝia sango ŝprucis sur
la muron kaj sur la ĉevalojn, kaj oni dispremis ŝin
per la piedoj. 34 Li eniris kaj manĝis kaj trinkis, kaj
diris: Rigardu, kie estas tiu malbenitino, kaj enterigu

ŝin, ĉar ŝi estas reĝidino. 35 Kaj oni iris, por enterigi
ŝin, sed oni trovis nenion de ŝi krom la kranio, la
piedoj, kaj la manplatoj. 36 Oni revenis kaj raportis al
li. Tiam li diris: Tio estas la vorto de la Eternulo, kiun
Li diris per Sia servanto Elija, la Teŝebano, nome: Sur
la kampo de Jizreel la hundoj formanĝos la karnon de
Izebel; 37 kaj la kadavro de Izebel estos kiel sterko sur
la tero sur la kampo de Jizreel, tiel, ke neniu povos
diri: Tio estas Izebel.

**10** Aĥab havis sepdek filojn en Samario. Kaj Jehu
skribis leterojn kaj sendis en Samarion al la
estroj de Jizreel, la plejaĝuloj, kaj la filedukistoj de
Aĥab, kun la sekvanta enhavo: 2 Kiam ĉi tiu letero
venos al vi, ĉe kiuj troviĝas la filoj de via sinjoro kaj
sub kies administrado troviĝas la ĉaroj kaj la ĉevaloj
kaj la fortikigita urbo kaj la bataliloj: 3 tiam rigardu,
kiu estas la plej bona kaj plej digna el la filoj de via
sinjoro, kaj sidigu lin sur la trono de lia patro kaj
batalu pro la domo de via sinjoro. 4 Sed ili tre forte
ektimis, kaj diris: Jen la du reĝoj ne povis kontraŭstari
al li, kiel do ni kontraŭstaros? 5 Kaj la palacestro kaj
la urbestro kaj la plejaĝuloj kaj la filedukistoj sendis
al Jehu, por diri: Ni estas viaj servantoj, kaj ĉion, kion
vi ordonos al ni, ni faros; ni neniun faros reĝo; kio
plaĉas al vi, tion faru. 6 Tiam li skribis al ili duan
leteron kun jena enhavo: Se vi estas sur mia flanko
kaj obeas mian voĉon, tiam prenu la kapojn de la
filoj de via sinjoro kaj venu al mi morgaŭ en ĉi tiu
tempo en Jizreelon. Kaj da reĝidoj estis sepdek homoj
ĉe la eminentuloj de la urbo, kiuj edukis ilin. 7 Kiam
la letero venis al ili, ili prenis la filojn de la reĝo kaj
buĉis ilin, sepdek homojn, kaj metis iliajn kapojn en
korbojn kaj sendis al li en Jizreelon. 8 Kaj venis la
sendito, kaj diris al li jene: Oni alportis la kapojn
de la reĝidoj. Kaj li diris: Kuŝigu ilin en du amasoj
antaŭ la enirejo de la pordego ĝis mateno. 9 Matene li
eliris kaj stariĝis, kaj diris al la tuta popolo: Vi estas
senkulpaj; estas mi, kiu faris konspiron kontraŭ mia
sinjoro kaj mortigis lin; sed kiu mortigis ĉiujn ĉi tiujn?
10 Sciu do nun, ke el la vortoj de la Eternulo nenio
falis teren, el tio, kion la Eternulo diris pri la domo
de Aĥab; la Eternulo faris tion, kion Li diris per Sia
servanto Elija. 11 Kaj Jehu mortigis ĉiujn restintojn el
la domo de Aĥab en Jizreel kaj ĉiujn liajn altrangulojn
kaj liajn konatojn kaj liajn pastrojn, ĝis restis neniu
saviĝinto. 12 Kaj li leviĝis, kaj iris kaj direktis sin
al Samario. Kiam li estis survoje ĉe la domo de la
paŝtistoj, 13 Jehu renkontis la fratojn de Aĥazja, reĝo
de Judujo, kaj li diris: Kiuj vi estas? Ili respondis: Ni
estas fratoj de Aĥazja, kaj ni iras, por demandi pri la
farto de la filoj de la reĝo kaj de la filoj de la reĝino.
14 Tiam li diris: Prenu ilin vivantajn. Kaj oni prenis
ilin vivantajn kaj buĉis ilin super la puto ĉe la domo
de paŝtistoj, kvardek du homojn, kaj neniu el ili restis.
15 De tie li foriris, kaj li renkontis Jehonadabon, filon
de Reĥab, irantan renkonte al li. Li salutis lin, kaj
diris al li: Ĉu via koro estas favora, kiel mia koro estas
favora al via koro? Jehonadab respondis: Jes. Se jes,
tiam donu al mi vian manon. Kaj li donis al li sian
manon kaj prenis lin al si sur la ĉaron. 16 Kaj li diris:
Iru kun mi kaj rigardu mian fervoron pri la Eternulo.
Kaj oni veturigis lin kun li sur lia ĉaro. 17 Kiam li
venis Samarion, li mortigis ĉiujn, kiuj restis de Aĥab
en Samario, ĝis li tute ekstermis lin, konforme al
la vorto de la Eternulo, kiun Li diris al Elija. 18 Kaj
Jehu kunvenigis la tutan popolon, kaj diris al ili: Aĥab
servis al Baal malmulte, Jehu servos al li multe; 19
kunvoku do al mi ĉiujn profetojn de Baal, ĉiujn liajn
servantojn, kaj ĉiujn liajn pastrojn, ke neniu forestu;
ĉar mi volas fari grandan oferadon al Baal; ĉiu, kiu
forestos, perdos sian vivon. Jehu faris tion kun ruza
intenco, por pereigi la servantojn de Baal. 20 Kaj Jehu
diris: Aranĝu sanktan kunvenon por Baal. Kaj oni
tion proklamis. 21 Kaj Jehu sendis al la tuta Izrael;
kaj venis ĉiuj servantoj de Baal; restis neniu, kiu ne
venus. Ili eniris en la domon de Baal, kaj la domo de
Baal pleniĝis de rando ĝis rando. 22 Kaj li diris al la
estro de la vestejo: Elportu vestojn por ĉiuj servantoj
de Baal. Kaj li elportis vestojn por ili. 23 Kaj Jehu
kun Jehonadab, filo de Reĥab, eniris en la domon de
Baal, kaj li diris al la servantoj de Baal: Esploru kaj
rigardu, ĉu ne estas ĉi tie kun vi iu el la servantoj de
la Eternulo, ĉar ĉi tie devas esti sole nur servantoj de
Baal. 24 Ili eniris, por fari buĉoferojn kaj bruloferojn.
Dume Jehu starigis ekstere okdek virojn, kaj diris: Se
ĉe iu el vi saviĝos iu el la homoj, kiujn mi transdonas
en viajn manojn, tiam lia animo anstataŭos la animon
de tiu. 25 Kiam la bruloferoj estis finitaj, Jehu diris
al la korpogardistoj kaj al la estroj: Iru, batu ilin, ke
neniu eliru. Kaj oni mortigis ilin per glavo, kaj la
korpogardistoj kaj la estroj forĵetis ilin kaj iris en
la urbon de la domo de Baal. 26 Kaj oni elportis la
statuojn el la domo de Baal kaj forbruligis ilin. 27 Kaj
oni disrompis la statuon de Baal, kaj oni detruis la

domon de Baal, kaj oni faris el ĝi ekskrementejon ĝis
la nuna tempo. 28 Kaj Jehu ekstermis Baalon el Izrael.
29 Tamen de la pekoj de Jerobeam, filo de Nebat, per
kiuj li pekigis Izraelon, Jehu ne deturnis sin, de la
oraj bovidoj, kiuj estis en Bet-El kaj en Dan. 30 Kaj la
Eternulo diris al Jehu: Pro tio, ke vi bone faris tion, kio
plaĉis al Mi, kaj vi faris al la domo de Aĥab konforme
al tio, kio estis en Mia koro, viaj filoj ĝis la kvara
generacio sidos sur la trono de Izrael. 31 Sed Jehu ne
zorgis pri tio, ke li iradu laŭ la instruo de la Eternulo,
Dio de Izrael, per sia tuta koro. Li ne deturnis sin de
la pekoj de Jerobeam, per kiuj li pekigis Izraelon. 32
En tiu tempo la Eternulo komencis faradi dehakojn
en Izrael, kaj Ĥazael venkobatis ilin ĉe ĉiuj limoj de
Izrael: 33 oriente de Jordan la tutan landon de Gilead,
de la Gadidoj, Rubenidoj, kaj Manaseidoj, komencante
de Aroer, kiu estas ĉe la torento Arnon, Gileadon kaj
Baŝanon. 34 La cetera historio de Jehu, kaj ĉio, kion li
faris, kaj lia tuta potenco estas priskribitaj en la libro
de kroniko de la reĝoj de Izrael. 35 Kaj Jehu ekdormis
kun siaj patroj, kaj oni enterigis lin en Samario. Kaj
anstataŭ li ekreĝis lia filo Jehoaĥaz. 36 La tempo de
reĝado de Jehu super Izrael en Samario estis dudek ok
jaroj.

11 Kiam Atalja, la patrino de Aĥazja, vidis, ke ŝia
filo mortis, ŝi leviĝis kaj ekstermis la tutan reĝan
idaron. 2 Sed Jehoŝeba, filino de la reĝo Joram kaj
fratino de Aĥazja, prenis Joaŝon, filon de Aĥazja, kaj
ŝtele forkondukis lin el inter la mortigataj filoj de
la reĝo, lin kaj lian nutristinon, kaj lokis ilin en la
ĉambro de litoj; kaj oni kaŝis lin for de Atalja, kaj li ne
estis mortigita. 3 Kaj li restis kaŝita kun ŝi en la domo
de la Eternulo dum ses jaroj; kaj Atalja reĝis super la
lando. 4 Sed en la sepa jaro sendis Jehojada kaj prenis
la centestrojn el la korpogardistoj kaj la kuristoj kaj
venigis ilin al si en la domon de la Eternulo; kaj li
faris kun ili interligon kaj ĵurigis ilin en la domo de la
Eternulo kaj montris al ili la filon de la reĝo. 5 Kaj li
ordonis al ili, dirante: Jenon vi devas fari: tiu triono
de vi, kiu venas en sabato, plenumu gardadon en la
domo de la reĝo; 6 triono estu ĉe la Pordego Sur; kaj
triono ĉe la pordego malantaŭ la korpogardistoj. Kaj
plenumu la gardadon de la domo alterne. 7 Du partoj
el vi ĉiuj, kiuj foriras en sabato, plenumu gardadon ĉe
la reĝo en la domo de la Eternulo. 8 Kaj ĉirkaŭu la
reĝon ĉiuflanke, ĉiu kun sia batalilo en la mano; kaj se
iu eniros en la vicojn, oni lin mortigu. Kaj estu apud
la reĝo, kiam li eliros aŭ eniros. 9 Kaj la centestroj
faris ĉion, kion ordonis la pastro Jehojada; kaj ĉiu
prenis siajn homojn, la sabate venantajn kaj la sabate
forirantajn, kaj venis al la pastro Jehojada. 10 La pastro
disdonis al la centestroj la lancojn kaj ŝildojn, kiuj
apartenis al la reĝo David kaj kiuj estis en la domo de
la Eternulo. 11 Kaj la korpogardistoj stariĝis, ĉiu kun
siaj bataliloj en la mano, de la dekstra flanko de la
domo ĝis la maldekstra flanko de la domo, ĉe la altaro
kaj ĉe la domo, ĉirkaŭe de la reĝo. 12 Kaj li elkondukis
la reĝidon kaj metis sur lin la kronon kaj la ateston;
kaj oni proklamis lin reĝo kaj sanktoleis lin, kaj oni
aplaŭdis kaj kriis: Vivu la reĝo! 13 Kiam Atalja aŭdis la
bruon de la kuranta popolo, ŝi iris al la popolo en la
domon de la Eternulo. 14 Kaj ŝi ekvidis, ke jen la reĝo
staras ĉe la kolono, laŭ la moro, kaj la eminentuloj kaj
la trumpetistoj apud la reĝo, kaj la tuta popolo de la
lando ĝojas, kaj oni trumpetas. Tiam Atalja disŝiris
siajn vestojn, kaj ekkriis: Konspiro, konspiro! 15 Kaj la
pastro Jehojada ordonis al la centestroj, la estroj de
la militistaro, kaj diris al ili: Elkonduku ŝin ekster la
vicojn, kaj ĉiun, kiu ŝin sekvos, mortigu per glavo;
ĉar la pastro diris: Oni ne mortigu ŝin en la domo
de la Eternulo. 16 Kaj oni liberigis por ŝi lokon, kaj
ŝi iris laŭ la vojo de la ĉevaloj al la reĝa domo, kaj
tie oni ŝin mortigis. 17 Kaj Jehojada faris interligon
inter la Eternulo kaj la reĝo kaj la popolo, ke ĝi estu
popolo de la Eternulo; kaj inter la reĝo kaj la popolo.
18 Kaj la tuta popolo de la lando iris en la domon de
Baal kaj ĝin detruis; kaj liajn altarojn kaj liajn bildojn
ili tute disrompis; kaj Matanon, la pastron de Baal,
ili mortigis antaŭ la altaroj. Kaj la pastro starigis
oficistaron en la domo de la Eternulo. 19 Kaj li prenis
la centestrojn kaj la korpogardistojn kaj la kuristojn
kaj la tutan popolon de la lando, kaj ili kondukis la
reĝon el la domo de la Eternulo, kaj ili venis per la
pordego de la kuristoj en la reĝan domon; kaj li sidiĝis
sur la trono de la reĝoj. 20 Kaj la tuta popolo de la
lando ĝojis, kaj la urbo estis trankvila. Sed Ataljan oni
mortigis per glavo en la reĝa domo. 21 La aĝon de sep
jaroj havis Jehoaŝ, kiam li fariĝis reĝo.

12 En la sepa jaro de Jehu Jehoaŝ fariĝis reĝo, kaj
kvardek jarojn li reĝis en Jerusalem. La nomo de
lia patrino estis Cibja, el Beer-Ŝeba. 2 Jehoaŝ agadis
tiel, kiel plaĉas al la Eternulo, dum la tempo, en kiu

gvidadis lin la pastro Jehojada. 3 Nur la altaĵojn oni
ne senfunkciigis; la popolo ĉiam ankoraŭ oferadis kaj
incensadis sur la altaĵoj. 4 Kaj Jehoaŝ diris al la pastroj:
La tutan sanktigatan monon, kiun oni alportas en
la domon de la Eternulo, la monon de pasantoj, la
monon, kiun oni donas laŭtakse por sia animo, la
tutan monon, kiun iu donas propradezire, por enporti
en la domon de la Eternulo, 5 la pastroj prenu al
si, ĉiu de sia konato, kaj ili rebonigu la difektojn en
la domo, ĉie, kie troviĝos ia difekto. 6 Sed ĉar ĝis
la dudek-tria jaro de la reĝo Jehoaŝ la pastroj ne
rebonigis la difektojn en la domo, 7 la reĝo Jehoaŝ
alvokis la pastron Jehojada kaj la aliajn pastrojn, kaj
diris al ili: Kial vi ne rebonigas la difektojn de la
domo? ne prenu do de nun monon de viaj konatoj,
sed donu ĝin por rebonigo de la domo. 8 Kaj la
pastroj konsentis ne preni plu monon de la popolo
kaj ne rebonigi la difektojn en la domo. 9 La pastro
Jehojada prenis keston kaj traboris truon supre, kaj
starigis ĝin apud la altaro, dekstre de la enirantoj en la
domon de la Eternulo. Kaj la pastroj, kiuj gardostaris
ĉe la sojlo, metadis tien la tutan monon, kiu estis
alportata en la domon de la Eternulo. 10 Ĉiufoje,
kiam ili vidis, ke en la kesto estas multe da mono,
venadis skribisto de la reĝo kaj la ĉefpastro, kaj ili
kunligadis kaj kalkuladis la monon, trovitan en la
domo de la Eternulo. 11 Kaj ili donadis la kalkulitan
monon en la manojn de la oficistoj laborgvidantoj
en la domo de la Eternulo; kaj ĉi tiuj elspezadis ĝin
por la ĉarpentistoj kaj konstruistoj, kiuj laboris en
la domo de la Eternulo, 12 kaj por la masonistoj
kaj la ŝtonhakistoj, kaj por aĉeti lignon kaj hakitajn
ŝtonojn, por rebonigi la difektojn en la domo de la
Eternulo, kaj por ĉio, kio devis esti elspezata por
la rebonigo de la domo. 13 Tamen oni ne faris por
la domo de la Eternulo arĝentajn tasojn, tranĉilojn,
aspergajn kalikojn, trumpetojn, ĉiajn orajn vazojn kaj
arĝentajn vazojn el la mono, kiu estis alportata en la
domon de la Eternulo; 14 sed oni donadis ĝin al la
oficistoj laborgvidantoj, por ke ili rebonigu per tio la
domon de la Eternulo. 15 Oni ne postulis kalkulan
raporton de tiuj homoj, en kies manojn oni donis
la monon, por transdoni al la farantoj de la laboroj,
sed ili laboris konfidate. 16 La monon de kulpofero
kaj la monon de pekofero oni ne enportadis en la
domon de la Eternulo: ĝi estis por la pastroj. 17 En
tiu tempo ekiris Ĥazael, reĝo de Sirio, kaj ekmilitis
kontraŭ Gat kaj venkoprenis ĝin; kaj Ĥazael intencis
iri kontraŭ Jerusalemon. 18 Tiam Jehoaŝ, reĝo de
Judujo, prenis la tutan sanktigitaĵon, kiun sanktigis
Jehoŝafat kaj Jehoram kaj Aĥazja, liaj patroj, reĝoj de
Judujo, kaj tion, kion li mem sanktigis, kaj la tutan
oron, kiu troviĝis en la trezorejoj de la domo de la
Eternulo kaj de la reĝa domo, kaj li sendis tion al
Ĥazael, reĝo de Sirio, kaj ĉi tiu foriris de Jerusalem.
19 La cetera historio de Joaŝ, kaj ĉio, kion li faris,
estas priskribitaj en la libro de kroniko de la reĝoj de
Judujo. 20 Liaj servantoj leviĝis kaj faris konspiron,
kaj mortigis Joaŝon en la domo Milo, sur la vojo al
Sila. 21 Jozaĥar, filo de Ŝimeat, kaj Jehozabad, filo de
Ŝomer, liaj servantoj, frapis lin, kaj li mortis. Kaj oni
enterigis lin kun liaj patroj en la urbo de David. Kaj
anstataŭ li ekreĝis lia filo Amacja.

13 En la dudek-tria jaro de Joaŝ, filo de Aĥazja, reĝo
de Judujo, Jehoaĥaz, filo de Jehu, fariĝis reĝo
super Izrael en Samario por la daŭro de dek sep jaroj.
2 Li agadis malbone antaŭ la Eternulo, kaj sekvadis la
pekojn de Jerobeam, filo de Nebat, per kiuj li pekigis
Izraelon; li ne deturnis sin de ili. 3 Kaj ekflamis la
kolero de la Eternulo kontraŭ la Izraelidoj, kaj Li
transdonis ilin en la manon de Ĥazael, reĝo de Sirio,
kaj en la manon de Ben-Hadad, filo de Ĥazael, por la
tuta tempo. 4 Sed Jehoaĥaz ekpreĝis al la Eternulo,
kaj la Eternulo aŭskultis lin, ĉar Li vidis la suferadon
de Izrael, kiel premis ilin la reĝo de Sirio. 5 Kaj la
Eternulo donis al la Izraelidoj savanton, kaj ili eliris
el sub la mano de la Sirianoj, kaj la Izraelidoj loĝis
en siaj tendoj kiel antaŭe. 6 Tamen ili ne deturnis
sin de la pekoj de la domo de Jerobeam, kiu pekigis
Izraelon, sed ili sekvis ilin; ankaŭ la sankta stango
restis en Samario.) 7 Al Jehoaĥaz ne restis pli ol
kvindek rajdistoj kaj dek ĉaroj kaj dek mil piedirantoj;
ĉar la reĝo de Sirio pereigis ilin kaj faris ilin kiel
polvo piedpremata. 8 La cetera historio de Jehoaĥaz,
kaj ĉio, kion li faris, kaj lia forto estas priskribitaj
en la libro de kroniko de la reĝoj de Izrael. 9 Kaj
Jehoaĥaz ekdormis kun siaj patroj, kaj oni enterigis
lin en Samario. Kaj anstataŭ li ekreĝis lia filo Joaŝ. 10
En la tridek-sepa jaro de Joaŝ, reĝo de Judujo, Jehoaŝ,
filo de Jehoaĥaz, fariĝis reĝo super Izrael en Samario,
por la daŭro de dek ses jaroj. 11 Li agadis malbone
antaŭ la Eternulo; li ne deturnis sin de ĉiuj pekoj de
Jerobeam, filo de Nebat, per kiuj li pekigis Izraelon;

ilin li sekvis. 12 La cetera historio de Joaŝ, kaj ĉio,
kion li faris, kaj lia forto, kaj kiel li militis kontraŭ
Amacja, reĝo de Judujo, estas priskribitaj en la libro
de kroniko de la reĝoj de Izrael. 13 Kaj Joaŝ ekdormis
kun siaj patroj, kaj Jerobeam eksidis sur lia trono. Kaj
oni enterigis Joaŝon en Samario kun la reĝoj de Izrael.
14 Eliŝa malsaniĝis per sia malsano, de kiu li estis
mortonta. Venis al li Joaŝ, reĝo de Izrael, kaj ploris
super li, kaj diris: Mia patro, mia patro, ĉaro de Izrael
kaj liaj rajdistoj! 15 Kaj Eliŝa diris al li: Prenu pafarkon
kaj sagojn. Kaj li prenis al si pafarkon kaj sagojn. 16
Kaj li diris al la reĝo de Izrael: Metu vian manon sur
la pafarkon. Kaj li metis sian manon. Kaj Eliŝa metis
siajn manojn sur la manojn de la reĝo, 17 kaj diris:
Malfermu la fenestron orienten. Li malfermis. Kaj
Eliŝa diris: Pafu. Li pafis. Kaj li diris: Sago de savo
de la Eternulo kaj sago de savo kontraŭ Sirio, kaj
vi venkobatos la Sirianojn en Afek, ĝis vi ilin tute
pereigos. 18 Kaj li diris: Prenu la sagojn. Li prenis.
Kaj li diris al la reĝo de Izrael: Frapu sur la teron. Li
frapis tri fojojn kaj haltis. 19 Tiam ekkoleris kontraŭ
li la homo de Dio, kaj diris: Vi devis frapi kvin aŭ
ses fojojn, tiam vi venkobatus la Sirianojn ĝis plena
pereo; sed nun vi nur tri fojojn batos la Sirianojn. 20
Eliŝa mortis, kaj oni enterigis lin. Kaj militistaroj de
Moab venis en la landon en la komenco de la jaro.
21 Okazis, ke, enterigante iun homon, oni ekvidis la
militistaron, kaj oni ĵetis la homon en la tombon de
Eliŝa. Kiam tiu homo tien falis kaj kuntuŝiĝis kun la
ostoj de Eliŝa, li reviviĝis kaj stariĝis sur siaj piedoj. 22
Ĥazael, reĝo de Sirio, premis la Izraelidojn dum la tuta
vivo de Jehoaĥaz. 23 Sed la Eternulo favorkoris ilin kaj
kompatis ilin kaj turnis Sin al ili pro Sia interligo kun
Abraham, Isaak, kaj Jakob, kaj Li ne volis ekstermi ilin
kaj ankoraŭ ne forĵetis ilin de antaŭ Sia vizaĝo. 24
Ĥazael, reĝo de Sirio, mortis, kaj anstataŭ li ekreĝis lia
filo Ben-Hadad. 25 Kaj Jehoaŝ, filo de Jehoaĥaz, prenis
returne el la mano de Ben-Hadad, filo de Ĥazael, la
urbojn, kiujn li milite prenis el la mano de lia patro
Jehoaĥaz. Tri fojojn Joaŝ venkobatis lin kaj reprenis la
urbojn de Izrael.

**14** En la dua jaro de Joaŝ, filo de Joaĥaz, reĝo de
Izrael, Amacja, filo de Joaŝ, reĝo de Judujo, fariĝis
reĝo. 2 Li havis la aĝon de dudek kvin jaroj, kiam li
fariĝis reĝo, kaj dudek naŭ jarojn li reĝis en Jerusalem.
La nomo de lia patrino estis Jehoadan, el Jerusalem.
3 Li agadis bone antaŭ la Eternulo, tamen ne kiel
lia patro David. Li agadis tiel, kiel agadis lia patro
Joaŝ. 4 La altaĵoj ne estis senfunkciigitaj; la popolo
ĉiam ankoraŭ oferadis kaj incensadis sur la altaĵoj. 5
Kiam la reĝeco fortiĝis en lia mano, li mortigis siajn
servantojn, kiuj mortigis la reĝon, lian patron. 6
Sed la infanojn de la mortigintoj li ne mortigis, kiel
estas skribite en la libro de instruo de Moseo, kion
ordonis la Eternulo, nome: Oni ne mortigu patrojn
pro la infanoj, kaj oni ne mortigu infanojn pro la
patroj, sed ĉiu povas esti mortigata nur pro sia peko.
7 Li venkobatis la Edomidojn en la Valo de Salo, dek
milojn, kaj prenis per milito Selan kaj donis al ĝi
la nomon Jokteel ĝis la nuna tago. 8 En tiu tempo
Amacja sendis senditojn al Jehoaŝ, filo de Jehoaĥaz,
filo de Jehu, reĝo de Izrael, por diri: Venu, ni komparu
niajn fortojn. 9 Tiam Jehoaŝ, reĝo de Izrael, sendis
al Amacja, reĝo de Judujo, por diri: La prunelo sur
Lebanon sendis al la cedro sur Lebanon, por diri: Donu
vian filinon al mia filo kiel edzinon. Sed preteriris
sovaĝa besto de Lebanon kaj dispremis per la piedoj
la prunelon. 10 Vi venkobatis la Edomidojn, kaj via
koro fieriĝis. Tenu vian gloron kaj sidu hejme. Kial
vi volas entrepreni aferon malfeliĉan, ke vi falu kaj
kun vi ankaŭ Judujo? 11 Sed Amacja ne obeis. Kaj
eliris Jehoaŝ, reĝo de Izrael, kaj ili komparis siajn
fortojn, li kaj Amacja, reĝo de Judujo, en Bet-Ŝemeŝ,
kiu estas en Judujo. 12 Kaj la Judoj estis venkobatitaj
de la Izraelidoj, kaj ili diskuris ĉiu al sia tendo. 13
Kaj Amacjan, reĝon de Judujo, filon de Jehoaŝ, filo de
Aĥazja, kaptis Jehoaŝ, reĝo de Izrael, en Bet-Ŝemeŝ;
kaj li venis Jerusalemon, kaj detruis la muregon de
Jerusalem, de la Pordego de Efraim ĝis la Pordego
Angula, sur la spaco de kvarcent ulnoj. 14 Kaj li
prenis la tutan oron kaj arĝenton, kaj ĉiujn vazojn,
kiuj troviĝis en la domo de la Eternulo kaj en la
trezorejoj de la reĝa domo, kaj ankaŭ garantiulojn,
kaj li reiris en Samarion. 15 La cetera historio de
Jehoaŝ, kion li faris, kaj lia forto, kaj kiel li militis
kontraŭ Amacja, reĝo de Judujo, ĉio estas priskribita
en la libro de kroniko de la reĝoj de Izrael. 16 Kaj
Jehoaŝ ekdormis kun siaj patroj, kaj oni enterigis lin
en Samario kun la reĝoj de Izrael. Kaj anstataŭ li
ekreĝis lia filo Jerobeam. 17 Kaj Amacja, filo de Joaŝ,
reĝo de Judujo, vivis post la morto de Jehoaŝ, filo de
Jehoaĥaz, reĝo de Izrael, ankoraŭ dek kvin jarojn. 18
La cetera historio de Amacja estas priskribita en la

libro de kroniko de la reĝoj de Judujo. 19 Oni faris
kontraŭ li konspiron en Jerusalem, kaj li forkuris en
Laĥiŝon. Sed oni sendis post li en Laĥiŝon, kaj tie oni
lin mortigis. 20 Kaj oni venigis lin sur ĉevaloj, kaj oni
enterigis lin kun liaj patroj en la urbo de David. 21
Kaj la tuta Juda popolo prenis Azarjan, kiu havis la
aĝon de dek ses jaroj, kaj faris lin reĝo anstataŭ lia
patro Amacja. 22 Li prikonstruis Elaton kaj revenigis
ĝin al Judujo, post kiam la reĝo ekdormis kun siaj
patroj. 23 En la dek-kvina jaro de Amacja, filo de Joaŝ,
reĝo de Judujo, ekreĝis Jerobeam, filo de Joaŝ, reĝo de
Izrael, en Samario, kaj li reĝis kvardek unu jarojn. 24
Li faradis malbonon antaŭ la okuloj de la Eternulo,
ne deturnis sin de ĉiuj pekoj de Jerobeam, filo de
Nebat, per kiuj li pekigis Izraelon. 25 Li restarigis la
limojn de Izrael de Ĥamat ĝis la maro de la dezerto,
konforme al la vorto de la Eternulo, Dio de Izrael,
kiun Li diris per Sia servanto Jona, filo de Amitaj, la
profeto el Gat-Ĥefer. 26 Ĉar la Eternulo vidis, ke la
suferado de Izrael estas tre mizera; restis nek sklavo
nek liberulo, kaj estis neniu helpanto por Izrael. 27 La
Eternulo ne decidis ekstermi la nomon de Izrael el
sub la ĉielo, kaj Li savis ilin per Jerobeam, filo de Joaŝ.
28 La cetera historio de Jerobeam, kaj ĉio, kion li faris,
kaj lia forto, kaj kiel li militis, kaj kiel li revenigis al
Izrael Damaskon kaj Ĥamaton de Judujo, ĉio estas
priskribita en la libro de kroniko de la reĝoj de Izrael.
29 Kaj Jerobeam ekdormis kun siaj patroj, kun la reĝoj
de Izrael. Kaj anstataŭ li ekreĝis lia filo Zeĥarja.

**15** En la dudek-sepa jaro de Jerobeam, reĝo de Izrael,
ekreĝis Azarja, filo de Amacja, reĝo de Judujo. 2
Li havis la aĝon de dek ses jaroj, kiam li fariĝis reĝo,
kaj kvindek du jarojn li reĝis en Jerusalem. La nomo
de lia patrino estis Jeĥolja, el Jerusalem. 3 Li agadis
bone antaŭ la Eternulo, tiel same, kiel agadis lia patro
Amacja. 4 Nur la altaĵoj ne estis senfunkciigitaj; la
popolo ĉiam ankoraŭ oferadis kaj incensadis sur la
altaĵoj. 5 La Eternulo frapis la reĝon, kaj li fariĝis lepra
ĝis la tago de sia morto, kaj li loĝis en izolita domo.
Kaj Jotam, filo de la reĝo, estis ĉefo de la domo kaj
regis la popolon de la lando. 6 La cetera historio de
Azarja, kaj ĉio, kion li faris, estas priskribitaj en la
libro de kroniko de la reĝoj de Judujo. 7 Kaj Azarja
ekdormis kun siaj patroj, kaj oni enterigis lin kun liaj
patroj en la urbo de David. Kaj anstataŭ li ekreĝis lia
filo Jotam. 8 En la tridek-oka jaro de Azarja, reĝo de
Judujo, Zeĥarja, filo de Jerobeam, fariĝis reĝo super
Izrael en Samario, kaj li reĝis ses monatojn. 9 Li faradis
malbonon antaŭ la okuloj de la Eternulo, kiel faradis
liaj patroj; li ne deturnis sin de la pekoj de Jerobeam,
filo de Nebat, per kiuj li pekigis Izraelon. 10 Kontraŭ
li faris konspiron Ŝalum, filo de Jabeŝ, kaj frapis lin
antaŭ la popolo kaj mortigis lin kaj ekreĝis anstataŭ
li. 11 La cetera historio de Zeĥarja estas priskribita en
la libro de kroniko de la reĝoj de Izrael. 12 Tio estas la
vorto de la Eternulo, kiun Li diris al Jehu, nome: Viaj
filoj sidos sur la trono de Izrael ĝis la kvara generacio.
Tiel fariĝis. 13 Ŝalum, filo de Jabeŝ, fariĝis reĝo en la
tridek-naŭa jaro de Uzija, reĝo de Judujo. Kaj li reĝis
unu monaton en Samario. 14 Kaj iris Menaĥem, filo
de Gadi, el Tirca, kaj venis en Samarion kaj frapis
Ŝalumon, filon de Jabeŝ, en Samario, kaj mortigis
lin kaj ekreĝis anstataŭ li. 15 La cetera historio de
Ŝalum, kaj lia konspiro, kiun li faris, estas priskribitaj
en la libro de kroniko de la reĝoj de Izrael. 16 Tiam
Menaĥem frapis Tifsaĥon, kaj ĉion, kio estis en ĝi, kaj
ĝian regionon, komencante de Tirca, pro tio, ke ĝi ne
malfermis al li la pordegon. Kaj li mortigis ĉiujn ĝiajn
gravedulinojn, disfendinte ilin. 17 En la tridek-naŭa
jaro de Azarja, reĝo de Judujo, Menaĥem, filo de Gadi,
fariĝis reĝo super Izrael, kaj li reĝis dek jarojn en
Samario. 18 Li faradis malbonon antaŭ la okuloj de la
Eternulo; dum sia tuta vivo li ne deturnis sin de ĉiuj
pekoj de Jerobeam, filo de Nebat, per kiuj li pekigis
Izraelon. 19 Pul, reĝo de Asirio, venis en la landon. Kaj
Menaĥem donis al Pul mil kikarojn da arĝento, por ke
li helpu lin, por fortikigi la reĝecon en lia mano. 20 Kaj
Menaĥem impostigis la arĝenton sur Izrael, sur ĉiuj
riĉuloj, sur ĉiu po kvindek sikloj da arĝento, por doni
al la reĝo de Asirio. Kaj la reĝo de Asirio iris returne
kaj ne restis tie en la lando. 21 La cetera historio de
Menaĥem, kaj ĉio, kion li faris, estas priskribitaj en la
libro de kroniko de la reĝoj de Izrael. 22 Menaĥem
ekdormis kun siaj patroj; kaj anstataŭ li ekreĝis lia
filo Pekaĥja. 23 En la kvindeka jaro de Azarja, reĝo
de Judujo, Pekaĥja, filo de Menaĥem, fariĝis reĝo
super Izrael en Samario, kaj li reĝis du jarojn. 24 Li
faradis malbonon antaŭ la okuloj de la Eternulo; li ne
deturnis sin de la pekoj de Jerobeam, filo de Nebat,
per kiuj li pekigis Izraelon. 25 Kaj faris kontraŭ li
konspiron Pekaĥ, filo de Remalja, lia altrangulo, kaj
frapis lin en Samario, en la salono de la reĝa domo,
kune kun Argob kaj Arje, kaj kun li estis kvindek viroj

el la Gileadanoj. Kaj li mortigis lin kaj ekreĝis anstataŭ
li. 26 La cetera historio de Pekaĥja, kaj ĉio, kion li
faris, estas priskribitaj en la libro de kroniko de la
reĝoj de Izrael. 27 En la kvindek-dua jaro de Azarja,
reĝo de Judujo, Pekaĥ, filo de Remalja, fariĝis reĝo
super Izrael en Samario, kaj li reĝis dudek jarojn. 28
Li faradis malbonon antaŭ la okuloj de la Eternulo;
li ne deturnis sin de la pekoj de Jerobeam, filo de
Nebat, per kiuj li pekigis Izraelon. 29 En la tempo de
Pekaĥ, reĝo de Izrael, venis Tiglat-Pileser, reĝo de
Asirio, kaj prenis Ijonon, Abel-Bet-Maaĥan, Janoaĥon,
Kedeŝon, Ĥacoron, Gileadon, Galileon, la tutan landon
de Naftali; kaj forkondukis ilin en Asirion. 30 Hoŝea,
filo de Ela, faris konspiron kontraŭ Pekaĥ, filo de
Remalja, kaj frapis lin kaj mortigis lin, kaj ekreĝis
anstataŭ li en la dudeka jaro de Jotam, filo de Uzija. 31
La cetera historio de Pekaĥ, kaj ĉio, kion li faris, estas
priskribitaj en la libro de kroniko de la reĝoj de Izrael.
32 En la dua jaro de Pekaĥ, filo de Remalja, reĝo de
Izrael, ekreĝis Jotam, filo de Uzija, reĝo de Judujo. 33 Li
havis la aĝon de dudek kvin jaroj, kiam li fariĝis reĝo,
kaj dek ses jarojn li reĝis en Jerusalem. La nomo de lia
patrino estis Jeruŝa, filino de Cadok. 34 Li agadis bone
antaŭ la Eternulo; li agadis tiel same, kiel agadis lia
patro Uzija. 35 Sed la altaĵoj ne estis senfunkciigitaj; la
popolo ĉiam ankoraŭ oferadis kaj incensadis sur la
altaĵoj. Li konstruis la supran pordegon ĉe la domo de
la Eternulo. 36 La cetera historio de Jotam, kaj ĉio,
kion li faris, estas priskribitaj en la libro de kroniko
de la reĝoj de Judujo. 37 En tiu tempo la Eternulo
komencis sendadi sur Judujon Recinon, reĝon de Sirio,
kaj Pekaĥon, filon de Remalja. 38 Kaj Jotam ekdormis
kun siaj patroj, kaj oni enterigis lin kun liaj patroj en
la urbo de lia patro David. Kaj anstataŭ li ekreĝis lia
filo Aĥaz.

**16** En la dek-sepa jaro de Pekaĥ, filo de Remalja,
ekreĝis Aĥaz, filo de Jotam, reĝo de Judujo. 2 La
aĝon de dudek jaroj havis Aĥaz, kiam li fariĝis reĝo,
kaj dek ses jarojn li reĝis en Jerusalem; kaj li ne agadis
bone antaŭ la Eternulo, lia Dio, kiel lia patro David. 3
Li iradis laŭ la vojo de la reĝoj de Izrael, kaj eĉ sian
filon li trairigis tra fajro, simile al la abomenindaĵoj
de la nacioj, kiujn la Eternulo forpelis de antaŭ la
Izraelidoj. 4 Li oferadis kaj incensadis sur la altaĵoj kaj
sur la montetoj kaj sub ĉiu verda arbo. 5 Tiam Recin,
reĝo de Sirio, kaj Pekaĥ, filo de Remalja, reĝo de Izrael,
iris milite kontraŭ Jerusalemon; ili sieĝis Aĥazon, sed
ne povis venkopreni. 6 En tiu tempo Recin, reĝo de
Sirio, revenigis Elaton al Sirio kaj elpelis la Judojn
el Elat; la Sirianoj eniris Elaton kaj ekloĝis tie ĝis la
nuna tago. 7 Aĥaz sendis senditojn al Tiglat-Pileser,
reĝo de Asirio, por diri: Mi estas via servanto kaj via
filo; venu, kaj savu min kontraŭ la mano de la reĝo de
Sirio kaj kontraŭ la mano de la reĝo de Izrael, kiuj
leviĝis kontraŭ mi. 8 Kaj Aĥaz prenis la arĝenton kaj
oron, kiuj troviĝis en la domo de la Eternulo kaj en la
trezorejoj de la reĝa domo, kaj sendis tion donace al
la reĝo de Asirio. 9 Kaj la reĝo de Asirio obeis lin, kaj
la reĝo de Asirio iris kontraŭ Damaskon kaj prenis
ĝin kaj transkondukis ĝiajn loĝantojn en Kiron, kaj
Recinon li mortigis. 10 La reĝo Aĥaz iris Damaskon
renkonte al Tiglat-Pileser, reĝo de Asirio, kaj li vidis
la altaron, kiu estis en Damasko; kaj la reĝo Aĥaz
sendis al la pastro Urija la bildon de la altaro kaj la
desegnon de ĝia tuta konstruo. 11 Kaj la pastro Urija
konstruis altaron. Konforme al ĉio, kion la reĝo Aĥaz
sendis el Damasko, la pastro Urija aranĝis, antaŭ ol la
reĝo Aĥaz venis el Damasko. 12 Kiam la reĝo venis
el Damasko, la reĝo ekvidis la altaron, kaj la reĝo
aliris al la altaro kaj faris sur ĝi oferon 13 kaj bruligis
sian bruloferon kaj sian farunoferon kaj verŝis sian
verŝoferon kaj aspergis la altaron per la sango de sia
pacofero. 14 Kaj la kupran altaron, kiu staris antaŭ la
Eternulo, li forŝovis de la antaŭa flanko de la domo,
de la loko inter la altaro kaj la domo de la Eternulo,
kaj starigis ĝin flanke de la altaro norde. 15 Kaj la
reĝo Aĥaz ordonis al la pastro Urija, dirante: Sur
la granda altaro bruligu la matenan bruloferon, la
vesperan farunoferon, la bruloferon de la reĝo kaj
lian farunoferon, la bruloferon de la tuta popolo, ilian
farunoferon kaj ilian verŝoferon, kaj per la tuta sango
de brulofero kaj per la tuta sango de buĉofero aspergu
ĝin; sed la kupra altaro restu, ĝis mi pripensos pri ĝi.
16 Kaj la pastro Urija faris ĉion konforme al tio, kiel
ordonis la reĝo Aĥaz. 17 La reĝo Aĥaz derompis la
muretojn de la bazaĵoj kaj deprenis de ili la lavujon,
kaj la maron li deprenis de la kupraj bovoj, kiuj estis
sub ĝi, kaj metis ĝin sur ŝtonan plankon. 18 Kaj la
kovritan sabatan halon, kiun oni konstruis ĉe la domo,
kaj la eksteran enirejon de la reĝo li turnis al la domo
de la Eternulo, pro la reĝo de Asirio. 19 La cetera
historio de Aĥaz, kion li faris, estas priskribita en la
libro de kroniko de la reĝoj de Judujo. 20 Kaj Aĥaz

ekdormis kun siaj patroj, kaj oni enterigis lin kun liaj
patroj en la urbo de David. Kaj anstataŭ li ekreĝis lia
filo Ĥizkija.

**17** En la dek-dua jaro de Aĥaz, reĝo de Judujo,
Hoŝea, filo de Ela, fariĝis reĝo en Samario super
Izrael, kaj li reĝis naŭ jarojn. 2 Li faradis malbonon
antaŭ la Eternulo, sed ne tiel, kiel la reĝoj de Izrael,
kiuj estis antaŭ li. 3 Kontraŭ lin iris Ŝalmaneser, reĝo
de Asirio, kaj Hoŝea fariĝis lia servanto kaj donadis
al li tributon. 4 Kiam la reĝo de Asirio rimarkis ĉe
Hoŝea perfidon, ĉar li sendis senditojn al So, reĝo de
Egiptujo, kaj ne liveris tributon al la reĝo de Asirio,
kiel ĉiujare, tiam la reĝo de Asirio kaptis lin kaj
metis lin en malliberejon. 5 Kaj la reĝo de Asirio iris
kontraŭ la tutan landon, venis al Samario, kaj sieĝis
ĝin dum tri jaroj. 6 En la naŭa jaro de Hoŝea la reĝo
de Asirio venkoprenis Samarion, kaj transkondukis la
Izraelidojn en Asirion, kaj loĝigis ilin en Ĥalaĥ, kaj en
Ĥabor, ĉe la rivero Gozan, kaj en la urboj de la Medoj.
7 Ĉar la Izraelidoj pekis kontraŭ la Eternulo, ilia Dio,
kiu elkondukis ilin el la lando Egipta, el sub la mano
de Faraono, reĝo de Egiptujo, kaj ili adoradis aliajn
diojn, 8 kaj agadis laŭ la leĝoj de la nacioj, kiujn la
Eternulo forpelis antaŭ la Izraelidoj, kaj laŭ tio, kiel
agadis la reĝoj de Izrael; 9 kaj la Izraelidoj blasfemadis
per malkonvenaj vortoj kontraŭ la Eternulo, ilia Dio,
kaj aranĝis al si altaĵojn en ĉiuj siaj urboj, komencante
de la gardostara turo ĝis la fortikigita urbo; 10 kaj
ili starigis al si statuojn kaj sanktajn stangojn sur
ĉiu alta monteto kaj sub ĉiu verda arbo; 11 kaj ili
incensadis tie sur ĉiuj altaĵoj, kiel la nacioj, kiujn la
Eternulo forpelis antaŭ ili, kaj faradis malbonaĵojn,
por inciti la Eternulon; 12 kaj ili servadis al la idoloj,
pri kiuj la Eternulo diris al ili: Ne faru tion. 13 Kaj
la Eternulo avertis la Izraelidojn kaj la Judojn per
ĉiuj Siaj profetoj kaj viziistoj, dirante: Returnu vin
de viaj malbonaj vojoj, kaj plenumu Miajn ordonojn
kaj leĝojn, laŭ la tuta instruo, kiun Mi donis al viaj
patroj kaj kiun Mi sendis al vi per Miaj servantoj, la
profetoj. 14 Sed ili ne aŭskultis, kaj ili malmoligis sian
nukon simile al la nuko de iliaj patroj, kiuj ne fidis la
Eternulon, sian Dion; 15 kaj ili malestimis Liajn leĝojn,
kaj Lian interligon, kiun Li faris kun iliaj patroj, kaj
Liajn avertojn, per kiuj Li avertis ilin, kaj ili sekvis
vantaĵon kaj vantiĝis, kaj sekvis la naciojn, kiuj estis
ĉirkaŭ ili kaj pri kiuj la Eternulo ordonis al ili, ke ili
ne imitu ilin; 16 kaj ili forlasis ĉiujn ordonojn de la
Eternulo, ilia Dio, kaj faris al si fandaĵon de du bovidoj
kaj faris sanktan stangon kaj adorkliniĝis antaŭ la
tuta armeo de la ĉielo kaj servis al Baal; 17 kaj ili
trairigadis siajn filojn kaj siajn filinojn tra fajro kaj
sorĉadis kaj aŭguradis kaj fordonis sin al farado de
malbono antaŭ la okuloj de la Eternulo, por inciti
Lin. 18 Tial la Eternulo forte ekkoleris kontraŭ la
Izraelidoj, kaj forpuŝis ilin de antaŭ Sia vizaĝo. Restis
nur sole la tribo de Jehuda. 19 Sed ankaŭ la Judoj
ne obeis la ordonojn de la Eternulo, sia Dio, kaj ili
sekvis la morojn de la Izraelidoj, kiujn tiuj starigis. 20
Kaj abomenis la Eternulo la tutan idaron de Izrael
kaj humiligis ilin kaj transdonis ilin en la manon de
rabantoj, ĝis Li tute forĵetis ilin de antaŭ Si. 21 Ĉar la
Izraelidoj defalis de la domo de David, kaj prenis al si
kiel reĝon Jerobeamon, filon de Nebat; kaj Jerobeam
deturnis Izraelon de la Eternulo kaj entiris ilin en
grandan pekon. 22 Kaj la Izraelidoj iradis en ĉiuj
pekoj de Jerobeam, kiujn li faris, ne deturnante sin de
ili, 23 ĝis la Eternulo forpuŝis Izraelon de antaŭ Sia
vizaĝo, kiel Li diris per ĉiuj Siaj servantoj, la profetoj;
kaj Izrael estas elpelita el sia lando en Asirion ĝis
la nuna tago. 24 Kaj la reĝo de Asirio transkondukis
homojn el Babel, Kut, Ava, Ĥamat, kaj Sefarvaim,
kaj ekloĝigis ilin en la urboj de Samario anstataŭ la
Izraelidoj. Kaj ili ekposedis Samarion kaj ekloĝis en
ĝiaj urboj. 25 Sed ĉar en la komenco de sia loĝado tie
ili ne timis la Eternulon, la Eternulo sendis kontraŭ
ilin leonojn, kiuj faris inter ili mortigadon. 26 Oni
raportis al la reĝo de Asirio, dirante: La popoloj, kiujn
vi transkondukis kaj loĝigis en la urboj de Samario,
ne konas la leĝojn de la Dio de la lando, kaj tial Li
sendis kontraŭ ilin leonojn, kiuj nun mortigas ilin, ĉar
ili ne konas la leĝojn de la Dio de la lando. 27 Tiam la
reĝo de Asirio ordonis, dirante: Venigu tien unu el la
pastroj, kiujn vi elkondukis el tie; oni iru kaj loĝu tie,
kaj li instruu al ili la leĝojn de la Dio de la lando. 28
Kaj venis unu el la pastroj, kiuj estis forkondukitaj el
Samario, kaj li ekloĝis en Bet-El, kaj instruis ilin, kiel
ili devas timi la Eternulon. 29 Tamen ĉiu popolo faris
ankaŭ siajn diojn, kaj starigis ilin en la domoj de la
altaĵoj, kiujn konstruis la Samarianoj, ĉiu popolo en
siaj urboj, en kiuj ili loĝis. 30 La Babelanoj faris Sukot-
Benoton, la Kutanoj faris Nergalon, la Ĥamatanoj faris
Aŝiman; 31 la Avaanoj faris Nibĥazon kaj Tartakon; kaj
la Sefarvaimanoj bruligadis siajn infanojn per fajro al

Adrameleĥ kaj Anameleĥ, la dioj de Sefarvaim. 32 Ili
timis ankaŭ la Eternulon, kaj starigis al si el sia mezo
pastrojn por la altaĵoj, kaj tiuj servadis por ili en la
domoj de la altaĵoj. 33 La Eternulon ili timis, kaj al siaj
dioj ili servis, laŭ la moro de tiuj popoloj, el kiuj oni
transkondukis ilin. 34 Ĝis la nuna tempo ili agas laŭ
la moroj antikvaj: ili ne timas la Eternulon, kaj ne
agas laŭ siaj leĝoj kaj siaj moroj, nek laŭ la instruo kaj
ordono, kiujn la Eternulo donis al la filoj de Jakob, al
kiu Li donis la nomon Izrael, 35 kun kiuj la Eternulo
faris interligon kaj ordonis al ili, dirante: Ne timu
aliajn diojn, ne adorkliniĝu antaŭ ili, ne servu al ili,
kaj ne faru al ili oferojn; 36 sed nur la Eternulon, kiu
elkondukis vin el la lando Egipta per granda forto
kaj etendita brako, Lin timu, antaŭ Li adorkliniĝu,
kaj al Li faru oferojn; 37 kaj la leĝojn kaj la decidojn
kaj la instruon kaj la ordonojn, kiujn Li skribis por
vi, observu, ke vi plenumu ilin ĉiam, kaj ne timu
aliajn diojn; 38 kaj la interligon, kiun Mi faris kun
vi, ne forgesu, kaj ne timu aliajn diojn; 39 sed nur
la Eternulon, vian Dion, timu, kaj Li savos vin el la
mano de ĉiuj viaj malamikoj. 40 Tamen ili ne obeis,
sed agis laŭ siaj moroj antaŭaj. 41 Tiuj popoloj timis la
Eternulon, sed ankaŭ al siaj idoloj ili servis, ankaŭ
iliaj infanoj kaj la infanoj de iliaj infanoj; kiel agis iliaj
patroj, tiel ili agas ĝis la nuna tago.

**18** En la tria jaro de Hoŝea, filo de Ela, reĝo de Izrael,
ekreĝis Ĥizkija, filo de Aĥaz, reĝo de Judujo. 2
Li havis la aĝon de dudek kvin jaroj, kiam li fariĝis
reĝo, kaj dudek naŭ jarojn li reĝis en Jerusalem. La
nomo de lia patrino estis Abi, filino de Zeĥarja. 3 Li
agadis bone antaŭ la Eternulo, tiel same, kiel agadis
lia patro David. 4 Li forigis la altaĵojn, rompis la
statuojn, dehakis la sanktajn stangojn, kaj disbatis
la kupran serpenton, kiun faris Moseo; ĉar ĝis tiu
tempo la Izraelidoj incensadis al ĝi, kaj oni nomis
ĝin Neĥuŝtan. 5 La Eternulon, Dion de Izrael, li fidis;
kaj simila al li ne ekzistis inter ĉiuj reĝoj de Judujo
post li, nek inter tiuj, kiuj estis antaŭ li. 6 Li forte
tenis sin al la Eternulo, ne deturnis sin de Li, kaj li
observadis Liajn ordonojn, kiujn la Eternulo donis
al Moseo. 7 Kaj la Eternulo estis kun li; ĉie, kien li
iris, li agis prudente. Li defalis de la reĝo de Asirio kaj
ĉesis servi al li. 8 Li venkobatis la Filiŝtojn ĝis Gaza kaj
ĝia regiono, de la gardostara turo ĝis la fortikigita
urbo. 9 En la kvara jaro de la reĝo Ĥizkija, tio estas
en la sepa jaro de Hoŝea, filo de Ela, reĝo de Izrael,
iris Ŝalmaneser, reĝo de Asirio, kontraŭ Samarion kaj
eksieĝis ĝin. 10 Kaj li venkoprenis ĝin post tri jaroj; en
la sesa jaro de Ĥizkija, tio estas en la naŭa jaro de
Hoŝea, reĝo de Izrael, Samario estis prenita. 11 Kaj la
reĝo de Asirio transkondukis la Izraelidojn en Asirion,
kaj loĝigis ilin en Ĥalaĥ, kaj en Ĥabor, ĉe la rivero
Gozan, kaj en la urboj de la Medoj; 12 pro tio, ke ili ne
obeis la voĉon de la Eternulo, sia Dio, kaj malobeis
Lian interligon, ĉion, kion ordonis Moseo, servanto
de la Eternulo, ili ne obeis kaj ne plenumis. 13 En
la dek-kvara jaro de la reĝo Ĥizkija eliris Sanĥerib,
reĝo de Asirio, kontraŭ ĉiujn fortikigitajn urbojn de
Judujo, kaj venkoprenis ilin. 14 Tiam Ĥizkija, reĝo de
Judujo, sendis al la reĝo de Asirio en Laĥiŝon, por
diri: Mi pekis; returnu vin de mi; kion vi metos sur
min, tion mi plenumos. Kaj la reĝo de Asirio metis sur
Ĥizkijan, reĝon de Judujo, tributon de tricent kikaroj
da arĝento kaj tridek kikaroj da oro. 15 Kaj Ĥizkija
fordonis la tutan arĝenton, kiu troviĝis en la domo de
la Eternulo kaj en la trezorejoj de la reĝa domo. 16 En
tiu tempo Ĥizkija dehakis la pordojn de la templo
de la Eternulo, kaj la kolonojn, kiujn Ĥizkija, reĝo
de Judujo, estis teginta, kaj donis ilin al la reĝo de
Asirio. 17 La reĝo de Asirio sendis Tartanon kaj Rab-
Sarison kaj Rabŝaken el Laĥiŝ al la reĝo Ĥizkija kun
granda militistaro al Jerusalem. Ili iris kaj venis en
Jerusalemon. Kiam ili venis, ili stariĝis ĉe la akvotubo
de la supra lageto, kiu estas ĉe la vojo de la kampo de
fulistoj. 18 Ili vokis la reĝon. Kaj eliris al ili Eljakim,
filo de Ĥilkija, la palacestro, kaj Ŝebna, la skribisto,
kaj Joaĥ, filo de Asaf, la kronikisto. 19 Kaj Rabŝake
diris al ili: Diru al Ĥizkija: Tiele diras la granda reĝo,
la reĝo de Asirio: Kio estas la fido, kiun vi fidas? 20
Vi diris nur buŝan babiladon; por milito oni bezonas
konsilon kaj forton. Nun kiun vi fidas, ke vi ribelis
kontraŭ mi? 21 Jen vi fidas la apogon de Egiptujo, tiu
kano rompita, kiu, se iu sin apogas sur ĝi, eniras en
lian manon kaj trapikas ĝin. Tia estas Faraono, reĝo
de Egiptujo, por ĉiuj, kiuj fidas lin. 22 Eble vi diros al
mi: La Eternulon, nian Dion, ni fidas? sed Li estas ja
Tiu, kies altaĵojn kaj altarojn Ĥizkija forigis, dirante al
Judujo kaj Jerusalem: Antaŭ ĉi tiu altaro adorkliniĝu
en Jerusalem. 23 Nun provu konkuri kun mia sinjoro,
la reĝo de Asirio; mi donos al vi du mil ĉevalojn — ĉu
vi povas trovi rajdantojn por ili? 24 Kiel vi povas forigi
estron, unu el la plej malgrandaj servantoj de mia

sinjoro, kaj fidi Egiptujon pro la ĉaroj kaj rajdistoj? 25
Cetere, ĉu sen la volo de la Eternulo mi iris kontraŭ
ĉi tiun lokon, por ruinigi ĝin? La Eternulo diris al
mi: Iru kontraŭ ĉi tiun landon kaj ruinigu ĝin. 26
Tiam Eljakim, filo de Ĥilkija, kaj Ŝebna kaj Joaĥ diris
al Rabŝake: Volu paroli al viaj sklavoj en la lingvo
Siria, ĉar ni komprenas; sed ne parolu kun ni Jude
antaŭ la oreloj de la popolo, kiu estas sur la murego.
27 Sed Rabŝake diris al ili: Ĉu al via sinjoro kaj al vi
sendis min mia sinjoro, por diri tiujn vortojn? ĉu ne
al la homoj, kiuj sidas sur la murego, por manĝi sian
ekskrementon kaj trinki sian urinon kune kun vi? 28
Kaj Rabŝake stariĝis, kaj ekkriis per laŭta voĉo Jude,
kaj li ekparolis, dirante: Aŭskultu la vortojn de la
granda reĝo, la reĝo de Asirio. 29 Tiele diras la reĝo:
Ĥizkija ne forlogu vin, ĉar li ne povos savi vin el lia
mano. 30 Kaj Ĥizkija ne fidigu vin per la Eternulo,
dirante: La Eternulo certe nin savos, kaj ĉi tiu urbo ne
estos transdonita en la manojn de la reĝo de Asirio. 31
Ne aŭskultu Ĥizkijan; ĉar tiele diras la reĝo de Asirio:
Faru kun mi pacon kaj eliru al mi, kaj manĝu ĉiu el sia
vinberĝardeno kaj ĉiu de sia figarbo kaj trinku ĉiu
la akvon el sia puto, 32 ĝis mi venos kaj prenos vin
en landon similan al via lando, en landon de greno
kaj mosto, en landon de pano kaj vinberĝardenoj,
en landon de olivoj kaj de mielo, kaj vi vivos kaj ne
mortos. Kaj ne aŭskultu Ĥizkijan, kiam li forlogas vin
per la vortoj: La Eternulo nin savos. 33 Ĉu la dioj de la
nacioj savis ĉiu sian landon el la manoj de la reĝo de
Asirio? 34 Kie estas la dioj de Ĥamat kaj de Arpad? kie
estas la dioj de Sefarvaim, de Hena kaj Iva? ĉu ili savis
Samarion el miaj manoj? 35 Kiu el ĉiuj dioj de tiuj
landoj savis sian landon el miaj manoj, ke la Eternulo
savu Jerusalemon el miaj manoj? 36 Kaj la popolo
silentis kaj nenion respondis al li; ĉar estis ordono
de la reĝo: Ne respondu al li. 37 Kaj Eljakim, filo de
Ĥilkija, la palacestro, kaj Ŝebna, la skribisto, kaj Joaĥ,
filo de Asaf, la kronikisto, venis al Ĥizkija en disŝiritaj
vestoj, kaj raportis al li la vortojn de Rabŝake.

19 Kiam la reĝo Ĥizkija tion aŭdis, li disŝiris siajn
vestojn kaj ĉirkaŭkovris sin per sako, kaj iris en
la domon de la Eternulo. 2 Kaj li sendis Eljakimon,
la palacestron, kaj Ŝebnan, la skribiston, kaj la
plejaĝulojn el la pastroj, ĉirkaŭkovritajn per sakoj,
al la profeto Jesaja, filo de Amoc. 3 Kaj ili diris al li:
Tiele diras Ĥizkija: Ĉi tiu tago estas tago de malfeliĉo,
de puno, kaj de malhonoro; ĉar infanoj atingis la
aperturon de la utero, sed forestas forto por naski.
4 Eble aŭdos la Eternulo, via Dio, ĉiujn vortojn de
Rabŝake, kiun sendis la reĝo de Asirio, lia sinjoro, por
blasfemi la vivantan Dion, kaj punos pro la vortoj,
kiujn aŭdis la Eternulo, via Dio. Levu do preĝon por la
restintoj, kiuj ankoraŭ ekzistas. 5 Kaj la servantoj de
la reĝo Ĥizkija venis al Jesaja. 6 Kaj Jesaja diris al ili:
Tiele parolu al via sinjoro: Tiele diras la Eternulo: Ne
timu la vortojn, kiujn vi aŭdis kaj per kiuj blasfemis
Min la servantoj de la reĝo de Asirio. 7 Jen Mi metos
en lin spiriton, ke, aŭdinte sciigon, li reiros en sian
landon, kaj Mi faligos lin per glavo en lia lando. 8
Kaj Rabŝake revenis, kaj trovis la reĝon de Asirio
militanta kontraŭ Libna; ĉar li aŭdis, ke li foriris de
Laĥiŝ. 9 Kaj venis sciigo pri Tirhaka, reĝo de Etiopujo,
nome: Li eliris, por militi kontraŭ vi. Tiam li denove
sendis senditojn al Ĥizkija kun la sekvanta komisio:
10 Tiele diru al Ĥizkija, reĝo de Judujo: Ne forlogu
vin via Dio, kiun vi fidas, dirante: Jerusalem ne estos
transdonita en la manojn de la reĝo de Asirio. 11 Vi
aŭdis ja, kion faris la reĝoj de Asirio al ĉiuj landoj,
ruinigante ilin; ĉu vi do saviĝos? 12 Ĉu ilin savis la dioj
de la nacioj, kiujn ekstermis miaj patroj, la naciojn de
Gozan kaj Ĥaran kaj Recef kaj la filojn de Eden en
Telasar? 13 Kie estas la reĝo de Ĥamat kaj la reĝo
de Arpad kaj la reĝo de la urbo Sefarvaim, de Hena
kaj Iva? 14 Ĥizkija prenis la leteron el la manoj de
la senditoj kaj legis ĝin, kaj li iris en la domon de la
Eternulo, kaj Ĥizkija disvolvis ĝin antaŭ la Eternulo.
15 Kaj Ĥizkija ekpreĝis al la Eternulo, kaj diris: Ho
Eternulo, Dio de Izrael, sidanta sur la keruboj! Vi estas
la sola Dio super ĉiuj regnoj de la tero, Vi kreis la
ĉielon kaj la teron; 16 klinu, ho Eternulo, Vian orelon,
kaj aŭskultu; malfermu, ho Eternulo, Viajn okulojn,
kaj rigardu; kaj aŭdu la vortojn de Sanĥerib, kiujn li
sendis, por insulti la Dion vivantan. 17 Estas vero, ho
Eternulo, la reĝoj de Asirio ruinigis la popolojn kaj
ilian teron, 18 kaj ĵetis iliajn diojn en fajron; ĉar tio
estis ne dioj, sed faritaĵoj de homaj manoj, ligno kaj
ŝtono; ili ekstermis ilin. 19 Sed nun, ho Eternulo, nia
Dio, savu nin do kontraŭ liaj manoj, por ke ĉiuj regnoj
de la tero eksciu, ke Vi, ho Eternulo, estas sola. 20 Kaj
Jesaja, filo de Amoc, sendis al Ĥizkija, por diri: Tiele
diras la Eternulo, Dio de Izrael: Tion, kion vi preĝis
al Mi pri Sanĥerib, reĝo de Asirio, Mi aŭdis. 21 Jen
estas tio, kion diris pri li la Eternulo: Malestimas vin,

mokas vin la virga filino de Cion, balancas post vi la
kapon la filino de Jerusalem. 22 Kiun vi blasfemis kaj
insultis? kaj kontraŭ kiun vi laŭtigis voĉon kaj alte
levis viajn okulojn? Kontraŭ la Sanktulon de Izrael! 23
Per viaj servantoj vi blasfemis la Sinjoron, kaj vi diris:
Kun mia multo da ĉaroj mi supreniris sur la supron
de montoj, sur la randon de Lebanon, kaj mi dehakis
ĝiajn altajn cedrojn, ĝiajn plej bonajn cipresojn, kaj
mi atingis ĝian plej altan pinton, ĝian ĝardensimilan
arbaron. 24 Mi fosis kaj trinkis fremdan akvon, kaj mi
sekigos per la plandoj de miaj piedoj ĉiujn riverojn de
Egiptujo. 25 Ĉu vi ne aŭdis, ke Mi jam delonge tion
decidis, de tempo antikva tion destinis? nun Mi tion
plenumis, ke la fortikigitaj urboj fariĝis amaso da
ruinŝtonoj. 26 Kaj iliaj loĝantoj senfortigitaj ektremis
kaj kovriĝis per honto; ili fariĝis kiel herbo de kampo,
kiel malgrava verdaĵo, kiel musko sur tegmentoj, kaj
kiel sunbruligita greno antaŭ la spikiĝo. 27 Sed vian
sidon kaj vian eliron kaj vian venon Mi scias, ankaŭ
vian koleron kontraŭ Mi. 28 Pro tio, ke vi koleris
kontraŭ Mi kaj via aroganteco venis al Miaj oreloj,
Mi metos Mian ringon en viajn nazotruojn kaj Mian
buŝbridaĵon en vian buŝon, kaj Mi reirigos vin per
la sama vojo, per kiu vi venis. 29 Kaj jen estas por
vi la pruvosigno: vi manĝos en ĉi tiu jaro grenon
memsemiĝintan, en la dua jaro grenon sovaĝan,
sed en la tria jaro vi semos kaj rikoltos kaj plantos
vinberĝardenojn kaj manĝos iliajn fruktojn. 30 Kaj
la restaĵo de la domo de Jehuda denove enradikiĝos
malsupre kaj donos fruktojn supre. 31 Ĉar el Jerusalem
devenos restaĵo, kaj savitaĵo de la monto Cion; la
fervoro de la Eternulo Cebaot tion faros. 32 Tial tiele
diras la Eternulo pri la reĝo de Asirio: Li ne eniros
en ĉi tiun urbon kaj ne ĵetos tien sagon kaj ne aliros
al ĝi kun ŝildo kaj ne ŝutos kontraŭ ĝi remparon. 33
Per la sama vojo, per kiu li venis, li reiros, kaj en
ĉi tiun urbon li ne eniros, diras la Eternulo. 34 Mi
defendos ĉi tiun urbon, por savi ĝin pro Mi kaj pro
Mia servanto David. 35 En tiu nokto eliris anĝelo de la
Eternulo kaj frapis en la tendaro de la Asirianoj cent
okdek kvin mil. Kiam oni leviĝis matene, oni ekvidis,
ke ili ĉiuj estas kadavroj senvivaj. 36 Kaj Sanĥerib,
la reĝo de Asirio, elmoviĝis kaj iris kaj rehejmiĝis
kaj restis en Nineve. 37 Kaj kiam li adorkliniĝis en
la domo de sia dio Nisroĥ, liaj filoj Adrameleĥ kaj
Ŝarecer mortigis lin per glavo, kaj mem ili forkuris
en la landon Araratan. Kaj ekreĝis anstataŭ li lia filo
Esar-Ĥadon.

20 En tiu tempo Ĥizkija morte malsaniĝis; kaj venis
al li la profeto Jesaja, filo de Amoc, kaj diris al
li: Tiele diras la Eternulo: Faru testamenton pri via
domo, ĉar vi mortos kaj ne vivos. 2 Tiam Ĥizkija turnis
sian vizaĝon al la muro, kaj ekpreĝis al la Eternulo,
dirante: 3 Mi petas, ho Eternulo, rememoru, ke mi
iradis antaŭ Vi kun vero kaj koro fidela, kaj mi faradis
tion, kio plaĉas al Vi. Kaj Ĥizkija laŭte ekploris. 4
Kiam Jesaja ankoraŭ ne eliris el la interna korto,
aperis al li la vorto de la Eternulo jene: 5 Reiru, kaj
diru al Ĥizkija, la estro de Mia popolo: Tiele diras
la Eternulo, Dio de via patro David: Mi aŭdis vian
preĝon, Mi vidis viajn larmojn; jen Mi resanigos vin;
en la tria tago vi iros en la domon de la Eternulo. 6
Kaj Mi aldonos al via vivo dek kvin jarojn; kaj kontraŭ
la mano de la reĝo de Asirio Mi savos vin kaj ĉi tiun
urbon, kaj Mi defendos ĉi tiun urbon pro Mi kaj pro
Mia servanto David. 7 Kaj Jesaja diris: Oni alportu
dispremitan figon. Kaj oni alportis kaj metis sur la
ŝvelaĵon, kaj li resaniĝis. 8 Kaj Ĥizkija diris al Jesaja:
Kia estas la signo, ke la Eternulo min resanigos kaj
mi iros en la tria tago en la domon de la Eternulo? 9
Jesaja respondis: Tio estos por vi la pruvosigno de la
Eternulo, ke la Eternulo plenumos tion, kion Li diris:
ĉu la hormontra ombro iru antaŭen je dek gradoj,
aŭ ĉu ĝi iru returne je dek gradoj? 10 Kaj Ĥizkija
diris: Facile estas por la ombro iri antaŭen je dek
gradoj; ne, la ombro iru returne je dek gradoj. 11 Tiam
la profeto Jesaja vokis al la Eternulo, kaj Li retiris
la hormontran ombron malantaŭen je dek gradoj
sur la hormontrilo de Aĥaz, sur kiu ĝi malsupriĝis.
12 En tiu tempo Berodaĥ-Baladan, filo de Baladan,
reĝo de Babel, sendis leterojn kaj donacojn al Ĥizkija;
ĉar li aŭdis, ke Ĥizkija estis malsana. 13 Kaj Ĥizkija
elaŭdis ilin, kaj montris al ili sian tutan trezorejon,
la arĝenton kaj la oron kaj la aromaĵojn kaj la karan
oleon kaj sian armilejon, kaj ĉion, kio troviĝis en liaj
trezorejoj; estis nenio, kion Ĥizkija ne montrus al ili
en sia domo kaj en sia tuta posedaĵo. 14 Kaj venis la
profeto Jesaja al la reĝo Ĥizkija, kaj diris al li: Kion
parolis tiuj homoj? kaj de kie ili venis al vi? Kaj Ĥizkija
diris: El lando malproksima ili venis, el Babel. 15 Kaj li
diris: Kion ili vidis en via domo? Kaj Ĥizkija respondis:
Ĉion, kio estas en mia domo, ili vidis; estis nenio, kion

mi ne montrus al ili en miaj trezorejoj. 16 Tiam Jesaja
diris al Ĥizkija: Aŭskultu la diron de la Eternulo: 17
Jen venos tagoj, kaj ĉio, kio estas en via domo kaj kion
kolektis viaj patroj ĝis la nuna tago, estos forportata
en Babelon; nenio restos, diras la Eternulo. 18 Kaj el
viaj filoj, kiuj devenos de vi, kiujn vi naskigos, oni
prenos; kaj ili estos korteganoj en la palaco de la reĝo
de Babel. 19 Kaj Ĥizkija diris al Jesaja: Bona estas la
vorto de la Eternulo, kiun vi diris. Kaj li diris plue:
Estu nur paco kaj vero en mia tempo. 20 La cetera
historio de Ĥizkija, kaj lia tuta forto, kaj kiel li faris la
lageton kaj la akvotubon kaj enkondukis la akvon en
la urbon, ĉio estas priskribita en la libro de kroniko
de la reĝoj de Judujo. 21 Kaj Ĥizkija ekdormis kun siaj
patroj, kaj anstataŭ li ekreĝis lia filo Manase.

**21** La aĝon de dek du jaroj havis Manase, kiam li
fariĝis reĝo, kaj kvindek kvin jarojn li reĝis en
Jerusalem. La nomo de lia patrino estis Ĥefci-Ba.
2 Li agadis malbone antaŭ la Eternulo, simile al la
abomenindaĵoj de la nacioj, kiujn la Eternulo forpelis
de antaŭ la Izraelidoj. 3 Li konstruis denove la altaĵojn,
kiujn forigis lia patro Ĥizkija; kaj li starigis altarojn al
Baal kaj faris sanktan stangon, kiel faris Aĥab, reĝo
de Izrael, kaj adorkliniĝis antaŭ la tuta armeo de la
ĉielo kaj servis al ĝi. 4 Li konstruis ankaŭ altarojn en
la domo de la Eternulo, pri kiu la Eternulo diris: En
Jerusalem Mi estigos Mian nomon. 5 Kaj li konstruis
altarojn al la tuta armeo de la ĉielo, sur la du kortoj
de la domo de la Eternulo. 6 Kaj li trairigis sian filon
tra fajro, kaj li aŭguradis kaj sorĉadis, kaj starigis
antaŭdiristojn kaj magiistojn; li multe agadis malbone
antaŭ la Eternulo, kolerigante Lin. 7 Ankaŭ la idolon
por Aŝtar, kiun li faris, li starigis en la domo, pri kiu la
Eternulo diris al David kaj al lia filo Salomono: En ĉi
tiu domo kaj en Jerusalem, kiun Mi elektis inter ĉiuj
triboj de Izrael, Mi estigos Mian nomon por eterne, 8
kaj Mi ne plu elvagigos la piedon de Izrael el la tero,
kiun Mi donis al iliaj patroj, se ili nur observos, por
agadi konforme al ĉio, kion Mi ordonis al ili, kaj al la
tuta instruo, kiun donis al ili Mia servanto Moseo. 9
Sed ili ne obeis; kaj Manase forlogis ilin tiel, ke ili agis
pli malbone, ol la nacioj, kiujn la Eternulo ekstermis
antaŭ la Izraelidoj. 10 Kaj la Eternulo ekparolis per Siaj
servantoj, la profetoj, dirante: 11 Pro tio, ke Manase,
reĝo de Judujo, faris tiujn abomenindaĵojn, kiuj estas
pli malbonaj, ol ĉio, kion faris la Amoridoj, kiuj estis
antaŭ li, kaj li pekigis ankaŭ la Judojn per siaj idoloj,
12 tiele diras la Eternulo, Dio de Izrael: Jen Mi venigos
sur Jerusalemon kaj Judujon tian malbonon, ke ĉe
ĉiu, kiu tion aŭdos, ektintos en ambaŭ liaj oreloj.
13 Mi etendos super Jerusalem la mezurŝnuron de
Samario kaj la vertikalon de la domo de Aĥab, kaj
Mi elviŝos Jerusalemon tiel, kiel oni elviŝas pladon,
elviŝos kaj renversos. 14 Kaj Mi forpuŝos la restaĵon de
Mia heredaĵo, kaj Mi transdonos ilin en la manojn de
iliaj malamikoj, kaj ili fariĝos kaptaĵo kaj rabaĵo por
ĉiuj siaj malamikoj; 15 pro tio, ke ili faradis malbonon
antaŭ Miaj okuloj kaj incitadis Min, de post la tago,
kiam iliaj patroj eliris el Egiptujo, ĝis la nuna tago. 16
Ankaŭ da senkulpa sango Manase elverŝis tre multe,
ĝis li plenigis Jerusalemon de unu rando ĝis la alia,
krom sia peko, per kiu li pekigis Judujon, por fari
malbonon antaŭ la okuloj de la Eternulo. 17 La cetera
historio de Manase, kaj ĉio, kion li faris, kaj la pekoj,
kiujn li faris, estas priskribitaj en la libro de kroniko
de la reĝoj de Judujo. 18 Kaj Manase ekdormis kun siaj
patroj, kaj oni enterigis lin en la ĝardeno ĉe lia domo,
en la ĝardeno de Uza. Kaj anstataŭ li ekreĝis lia filo
Amon. 19 La aĝon de dudek du jaroj havis Amon, kiam
li fariĝis reĝo, kaj du jarojn li reĝis en Jerusalem. La
nomo de lia patrino estis Meŝulemet, filino de Ĥaruc,
el Jotba. 20 Li agadis malbone antaŭ la Eternulo, kiel
agadis lia patro Manase. 21 Li iradis laŭ tute la sama
vojo, laŭ kiu iradis lia patro, kaj li servadis al la idoloj,
al kiuj servadis lia patro, kaj adorkliniĝadis antaŭ ili.
22 Li forlasis la Eternulon, Dion de liaj patroj, kaj ne
iradis laŭ la vojo de la Eternulo. 23 Kaj la servantoj de
Amon konspiris kontraŭ li, kaj mortigis la reĝon en lia
domo. 24 Sed la popolo de la lando mortigis ĉiujn, kiuj
faris konspiron kontraŭ la reĝo Amon; kaj la popolo
de la lando faris reĝo anstataŭ li lian filon Joŝija. 25 La
cetera historio de Amon, kion li faris, estas priskribita
en la libro de kroniko de la reĝoj de Judujo. 26 Kaj oni
enterigis lin en lia tombo, en la ĝardeno de Uza. Kaj
anstataŭ li ekreĝis lia filo Joŝija.

**22** La aĝon de ok jaroj havis Joŝija, kiam li fariĝis
reĝo, kaj tridek unu jarojn li reĝis en Jerusalem.
La nomo de lia patrino estis Jedida, filino de Adaja,
el Bockat. 2 Li agadis bone antaŭ la Eternulo, kaj
iradis tute laŭ la vojo de sia patro David, kaj ne
deflankiĝis dekstren, nek maldekstren. 3 En la dek-
oka jaro de la reĝo Joŝija la reĝo sendis la skribiston

Ŝafan, filo de Acalja, filo de Meŝulam, en la domon de
la Eternulo, dirante: 4 Iru al la ĉefpastro Ĥilkija, ke
li elprenu la tutan monon, kiu estis alportita en la
domon de la Eternulo kaj kiun kolektis de la popolo la
pordogardistoj, 5 kaj oni transdonu ĝin en la manojn
de la laborplenumantoj, kiuj havis komision en la
domo de la Eternulo, por ke ĉi tiuj donu ĝin al la
laborantoj en la domo de la Eternulo, por rebonigi
la difektojn en la domo, 6 al la ĉarpentistoj kaj
konstruistoj kaj masonistoj, kaj por aĉeti lignon kaj
ĉirkaŭhakitajn ŝtonojn por la rebonigo de la domo;
7 sed oni ne postulu de ili kalkulan raporton pri la
mono, transdonita en iliajn manojn, ĉar ili devas
labori konfidate. 8 Kaj la ĉefpastro Ĥilkija diris al la
skribisto Ŝafan: Libron de la instruo mi trovis en la
domo de la Eternulo. Kaj Ĥilkija donis la libron al
Ŝafan, kaj li ĝin legis. 9 Kaj la skribisto Ŝafan venis al
la reĝo kaj alportis al la reĝo respondon, kaj diris: Viaj
servantoj elŝutis la monon, kiu troviĝis en la domo, kaj
donis ĝin en la manojn de la laborplenumantoj en la
domo de la Eternulo. 10 Kaj la skribisto Ŝafan raportis
al la reĝo, dirante: Libron donis al mi la pastro Ĥilkija.
Kaj Ŝafan legis ĝin antaŭ la reĝo. 11 Kiam la reĝo aŭdis
la vortojn de la libro de la instruo, li disŝiris siajn
vestojn. 12 Kaj la reĝo ordonis al la pastro Ĥilkija, kaj
al Aĥikam, filo de Ŝafan, kaj al Aĥbor, filo de Miĥaja,
kaj al la skribisto Ŝafan, kaj al Asaja, servanto de la
reĝo, dirante: 13 Iru, demandu la Eternulon por mi
kaj por la popolo kaj por la tuta Judujo koncerne la
vortojn de tiu trovita libro; ĉar granda estas la kolero
de la Eternulo, ekflaminta kontraŭ ni pro tio, ke niaj
patroj ne obeis la vortojn de tiu libro, por plenumi
ĉion, kio estas skribita por ni. 14 Kaj iris la pastro
Ĥilkija kaj Aĥikam kaj Aĥbor kaj Ŝafan kaj Asaja al
la profetino Ĥulda, edzino de Ŝalum, filo de Tikva,
filo de Ĥarĥas, la vestogardisto (ŝi loĝis en Jerusalem,
en la dua parto); kaj ili parolis kun ŝi. 15 Kaj ŝi diris
al ili: Tiele diras la Eternulo, Dio de Izrael: Diru al la
homo, kiu sendis vin al mi: 16 Tiele diras la Eternulo:
Jen Mi venigos malfeliĉon sur ĉi tiun lokon kaj sur
ĝiajn loĝantojn, ĉiujn vortojn de la libro, kiun legis
la reĝo de Judujo. 17 Pro tio, ke ili Min forlasis kaj
incensis al aliaj dioj, kolerigante Min per ĉiuj faroj de
siaj manoj, ekflamis Mia kolero kontraŭ ĉi tiu loko kaj
ne estingiĝos. 18 Sed koncerne la reĝon de Judujo, kiu
sendis vin, por demandi la Eternulon, diru al li jene:
Tiele diras la Eternulo, Dio de Izrael, pri la vortoj,
kiujn vi aŭdis: 19 Ĉar via koro moliĝis kaj vi humiliĝis
antaŭ la Eternulo, kiam vi aŭdis, kion Mi diris pri ĉi
tiu loko kaj pri ĝiaj loĝantoj, ke ili fariĝos ruinaĵo kaj
malbenaĵo, kaj vi disŝiris viajn vestojn kaj ploris antaŭ
Mi, tial Mi ankaŭ aŭskultis vin, diras la Eternulo. 20
Pro tio jen Mi alkolektos vin al viaj patroj, kaj vi iros
en vian tombon en paco, kaj viaj okuloj ne vidos la
tutan malfeliĉon, kiun Mi venigos sur ĉi tiun lokon.
Kaj ili alportis la respondon al la reĝo.

**23** La reĝo sendis, kaj oni kunvenigis al li ĉiujn
plejaĝulojn de Judujo kaj Jerusalem. 2 Kaj la reĝo
iris en la domon de la Eternulo, kaj kune kun li ĉiuj
Judoj kaj ĉiuj loĝantoj de Jerusalem, kaj la pastroj kaj
la profetoj kaj la tuta popolo, de la malgrandaj ĝis la
grandaj; kaj oni voĉlegis antaŭ ili ĉiujn vortojn de la
libro de interligo, kiu estis trovita en la domo de la
Eternulo. 3 Kaj la reĝo stariĝis ĉe la kolono, kaj faris
interligon antaŭ la Eternulo, por sekvi la Eternulon
kaj observi Liajn ordonojn kaj Liajn atestojn kaj Liajn
leĝojn, per la tuta koro kaj per la tuta animo, por
restarigi la vortojn de tiu interligo, skribitajn en tiu
libro. Kaj la tuta popolo aliĝis al la interligo. 4 Kaj la
reĝo ordonis al la ĉefpastro Ĥilkija kaj al la duagradaj
pastroj kaj al la pordogardistoj, ke oni elportu el la
templo de la Eternulo ĉiujn objektojn, faritajn por
Baal kaj por Aŝtar kaj por la tuta armeo de la ĉielo;
kaj oni forbruligis ilin ekster Jerusalem sur la kampo
Kidron, kaj oni forportis ilian cindron en Bet-Elon.
5 Kaj li forigis la idolpastrojn, kiujn starigis la reĝoj
de Judujo, por incensi sur la altaĵoj en la urboj de
Judujo kaj en la ĉirkaŭaĵo de Jerusalem, kaj tiujn, kiuj
incensadis al Baal, al la suno, al la luno, al la stelaroj,
kaj al la tuta armeo de la ĉielo. 6 Kaj li elportigis la
sanktan stangon el la domo de la Eternulo ekster
Jerusalemon al la torento Kidron; kaj oni forbruligis
ĝin ĉe la torento Kidron kaj disfrotis ĝin ĝis cindreco,
kaj oni ĵetis la cindron sur la tombejon de la simpla
popolo. 7 Kaj li detruis la domojn de malĉastistoj,
kiuj estis ĉe la domo de la Eternulo kaj en kiuj la
virinoj teksadis tendojn por Aŝtar. 8 Kaj li venigis
ĉiujn pastrojn el la urboj de Judujo, kaj malpurigis la
altaĵojn, sur kiuj la pastroj incensadis, de Geba ĝis
Beer-Ŝeba; kaj li detruis la altaĵojn ĉe la pordegoj;
tiun, kiu estis antaŭ la pordego de la urbestro Josuo,
kaj tiun, kiu estis maldekstre ĉe la enirado en la
urbon. 9 Tamen la pastroj de la altaĵoj ne oferadis sur
la altaro de la Eternulo en Jerusalem, sed ili manĝadis

macojn kune kun siaj fratoj. 10 Kaj li malpurigis ankaŭ
Tofeton, kiu estis en la valo de la filoj de Hinom, por
ke neniu trairigu sian filon aŭ sian filinon tra fajro al
Moleĥ. 11 Kaj li forigis la ĉevalojn, kiujn la reĝoj de
Judujo starigis al la suno ĉe la enirejo de la domo de la
Eternulo, apud la ĉambro de la eŭnuko Netan-Meleĥ
en Parvarim, kaj la ĉarojn de la suno li forbruligis per
fajro. 12 Kaj la altarojn, kiuj estis sur la tegmento de la
supra ĉambro de Aĥaz, kiujn faris la reĝoj de Judujo,
kaj la altarojn, kiujn faris Manase en la du kortoj de la
domo de la Eternulo, la reĝo detruis, kaj li kuris de tie
kaj ĵetis ilian cindron en la torenton Kidron. 13 Ankaŭ
la altaĵojn, kiuj estis antaŭ Jerusalem, dekstre de la
monto de pereo, kaj kiujn aranĝis Salomono, reĝo
de Izrael, por Aŝtar, abomenindaĵo de la Cidonanoj,
kaj por Kemoŝ, abomenindaĵo de la Moabidoj, kaj
por Milkom, abomenindaĵo de la Amonidoj, la reĝo
malpurigis. 14 Kaj li disrompis la statuojn kaj dehakis
la sanktajn stangojn, kaj plenigis ilian lokon per ostoj
de homoj. 15 Ankaŭ la altaron, kiu estis en Bet-El,
kaj la altaĵon, kiun aranĝis Jerobeam, filo de Nebat,
kiu pekigis Izraelon, ankaŭ tiun altaron kaj la altaĵon
li detruis, kaj li forbruligis la altaĵon kaj faris el ĝi
polvon kaj forbruligis la sanktan stangon. 16 Joŝija
sin turnis, kaj ekvidis la tombojn, kiuj estis tie sur la
monto, kaj li sendis, kaj prenigis la ostojn el la tomboj
kaj forbruligis ilin sur la altaro kaj malpurigis ĝin,
konforme al la vorto de la Eternulo, kiun proklamis
tiu homo de Dio, kiu antaŭdiris tiun fariĝon. 17 Kaj li
diris: Kio estas tiu monumento, kiun mi vidas? Kaj la
loĝantoj de la urbo diris al li: Tio estas la tombo de la
homo de Dio, kiu venis el Judujo, kaj antaŭdiris tiujn
farojn, kiujn vi faris koncerne la altaron de Bet-El.
18 Kaj li diris: Lasu lin kuŝi, neniu tuŝu liajn ostojn.
Tiamaniere liaj ostoj estis savitaj kun la ostoj de la
profeto, kiu venis el Samario. 19 Ankaŭ ĉiujn domojn
de la altaĵoj, kiuj estis en la urboj de Samario kaj kiujn
konstruis la reĝoj de Izrael, por inciti la Eternulon,
Joŝija detruis, kaj agis kun ili simile al tio, kion li faris
en Bet-El. 20 Kaj li buĉis ĉiujn pastrojn de la altaĵoj,
kiuj tie estis, sur la altaroj, kaj bruligis sur ili homajn
ostojn; kaj li revenis en Jerusalemon. 21 Kaj la reĝo
ordonis al la tuta popolo, dirante: Faru Paskon al la
Eternulo, via Dio, kiel estas skribite en tiu libro de la
interligo. 22 Ĉar simila Pasko ne estis farita de post
la tempo de la juĝistoj, kiuj juĝadis Izraelon, kaj en
la tuta tempo de la reĝoj de Izrael kaj de la reĝoj de
Judujo; 23 nur en la dek-oka jaro de la reĝo Joŝija estis
farita tiu Pasko al la Eternulo en Jerusalem. 24 Kaj la
aŭguristojn kaj la sorĉistojn kaj la domajn diojn kaj la
idolojn kaj ĉiujn abomenindaĵojn, kiuj montriĝis en
la Juda lando kaj en Jerusalem, Joŝija ekstermis, por
plenumi la vortojn de la instruo, skribitajn en la libro,
kiun la pastro Ĥilkija trovis en la domo de la Eternulo.
25 Ne estis antaŭ li reĝo simila al li, kiu turnis sin al
la Eternulo per sia tuta koro kaj per sia tuta animo
kaj per sia tuta forto, konforme al la tuta instruo de
Moseo; kaj post li ne aperis simila al li. 26 Tamen la
Eternulo ne deturnis Sin de la granda furiozo de Sia
kolero, per kiu Lia kolero ekflamis kontraŭ Judujo
pro ĉiuj incitoj, per kiuj incitis Lin Manase. 27 Kaj la
Eternulo diris: Ankaŭ Judujon Mi forigos de antaŭ Mia
vizaĝo, kiel Mi forigis Izraelon, kaj Mi forpuŝos ĉi tiun
urbon, kiun Mi elektis, Jerusalemon, kaj la domon,
pri kiu Mi diris, ke Mia nomo tie estos. 28 La cetera
historio de Joŝija, kaj ĉio, kion li faris, estas priskribitaj
en la libro de kroniko de la reĝoj de Judujo. 29 En lia
tempo Faraono Neĥo, reĝo de Egiptujo, iris kontraŭ
la reĝon de Asirio al la rivero Eŭfrato. La reĝo Joŝija
iris renkonte al li, kaj ĉi tiu mortigis lin en Megido,
kiam li ekvidis lin. 30 Kaj liaj servantoj forveturigis lin
mortintan el Megido kaj venigis lin en Jerusalemon
kaj enterigis lin en lia tombo. Kaj la popolo de la
lando prenis Jehoaĥazon, filon de Joŝija, kaj sanktoleis
lin kaj faris lin reĝo anstataŭ lia patro. 31 La aĝon de
dudek tri jaroj havis Jehoaĥaz, kiam li fariĝis reĝo, kaj
tri monatojn li reĝis en Jerusalem. La nomo de lia
patrino estis Ĥamutal, filino de Jeremia, el Libna. 32
Li agadis malbone antaŭ la Eternulo, tiel same kiel
agadis liaj patroj. 33 Kaj Faraono Neĥo malliberigis
lin en Ribla en la lando Ĥamat, por ke li ne reĝu en
Jerusalem, kaj li metis sur la landon monpunon de
cent kikaroj da arĝento kaj unu kikaro da oro. 34 Kaj
Faraono Neĥo ekreĝigis Eljakimon, filon de Joŝija,
anstataŭ lia patro Joŝija, kaj ŝanĝis lian nomon je
Jehojakim; sed Jehoaĥazon li prenis kaj venigis en
Egiptujon, kaj tie li mortis. 35 La arĝenton kaj oron
Jehojakim donis al Faraono; sed li metis tion sur la
landon, ke oni donu la arĝenton laŭ la ordono de
Faraono: de ĉiu laŭ taksado li prenis la arĝenton kaj la
oron de la popolo de la lando, por doni al Faraono
Neĥo. 36 La aĝon de dudek kvin jaroj havis Jehojakim,
kiam li fariĝis reĝo, kaj dek unu jarojn li reĝis en
Jerusalem. La nomo de lia patrino estis Zebuda, filino

de Pedaja, el Ruma. 37 Li agadis malbone antaŭ la
Eternulo, tiel same, kiel agadis liaj patroj.

**24** En lia tempo venis Nebukadnecar, reĝo de Babel;
kaj Jehojakim estis lia subulo dum tri jaroj, sed
poste li defalis de li. 2 La Eternulo sendis sur lin
hordojn da Ĥaldeoj, hordojn da Sirianoj, hordojn da
Moabidoj, kaj hordojn da Amonidoj, sendis ilin sur
Judujon, por pereigi ĝin, konforme al la vorto de la
Eternulo, kiun Li diris per Siaj servantoj, la profetoj. 3
Sed laŭ la ordono de la Eternulo tio fariĝis al Judujo,
por forpuŝi ĝin de antaŭ Lia vizaĝo pro la pekoj de
Manase, pro ĉio, kion li faris; 4 ankaŭ pro la senkulpa
sango, kiun li verŝis, plenigante Jerusalemon per
senkulpa sango, la Eternulo ne volis pardoni. 5 La
cetera historio de Jehojakim, kaj ĉio, kion li faris,
estas priskribitaj en la libro de kroniko de la reĝoj
de Judujo. 6 Kaj Jehojakim ekdormis kun siaj patroj,
kaj anstataŭ li ekreĝis lia filo Jehojaĥin. 7 La reĝo de
Egiptujo ne eliris plu el sia lando, ĉar la reĝo de Babel
forprenis ĉion, kio apartenis al la reĝo de Egiptujo,
de la torento de Egiptujo ĝis la rivero Eŭfrato. 8 La
aĝon de dek ok jaroj havis Jehojaĥin, kiam li fariĝis
reĝo, kaj tri monatojn li reĝis en Jerusalem. La nomo
de lia patrino estis Neĥuŝta, filino de Elnatan, el
Jerusalem. 9 Li agadis malbone antaŭ la Eternulo,
tiel same, kiel agadis lia patro. 10 En tiu tempo la
servantoj de Nebukadnecar, reĝo de Babel, iris kontraŭ
Jerusalemon, kaj oni komencis sieĝi la urbon. 11 Kaj
Nebukadnecar, reĝo de Babel, venis al la urbo, kiam
liaj servantoj ĝin sieĝis. 12 Kaj Jehojaĥin, reĝo de
Judujo, eliris al la reĝo de Babel, li kaj lia patrino kaj
liaj servantoj kaj liaj altranguloj kaj liaj korteganoj; kaj
la reĝo de Babel prenis lin en la oka jaro de sia reĝado.
13 Kaj li elprenis el tie ĉiujn trezorojn de la domo de
la Eternulo kaj la trezorojn de la reĝa domo, kaj li
disrompis ĉiujn orajn vazojn, kiujn Salomono, reĝo de
Izrael, faris en la templo de la Eternulo, kiel diris la
Eternulo. 14 Kaj li forkondukis ĉiujn Jerusalemanojn,
ĉiujn eminentulojn, ĉiujn fortajn militistojn — dek
mil estis forkondukitaj — kaj ĉiujn artistojn kaj ĉiujn
forĝistojn; restis neniu krom la malriĉa popolo de la
lando. 15 Kaj li forkondukis Jehojaĥinon en Babelon;
kaj la patrinon de la reĝo kaj la edzinojn de la reĝo
kaj liajn korteganojn kaj la potenculojn de la lando li
forkondukis en kaptitecon el Jerusalem en Babelon.
16 Kaj ĉiujn fortulojn, sep mil, kaj la artistojn kaj la
forĝistojn, mil, ĉiujn bravajn militistojn, la reĝo de
Babel forkondukis en kaptitecon en Babelon. 17 Kaj
la reĝo de Babel faris reĝo anstataŭ li lian onklon
Matanja, kaj ŝanĝis lian nomon je Cidkija. 18 La aĝon
de dudek unu jaroj havis Cidkija, kiam li fariĝis reĝo,
kaj dek unu jarojn li reĝis en Jerusalem. La nomo de
lia patrino estis Ĥamutal, filino de Jeremia, el Libna.
19 Li agadis malbone antaŭ la Eternulo, tiel same, kiel
agadis Jehojakim. 20 Ĉar la kolero de la Eternulo estis
kontraŭ Jerusalem kaj kontraŭ Judujo, ĝis Li forĵetis
ilin de antaŭ Sia vizaĝo. Kaj Cidkija defalis de la reĝo
de Babel.

**25** En la naŭa jaro de lia reĝado, en la deka monato,
en la deka tago de la monato, venis Nebukadnecar,
reĝo de Babel, li kaj lia tuta militistaro, kontraŭ
Jerusalemon, kaj eksieĝis ĝin, kaj oni konstruis ĉirkaŭ
ĝi bastionojn. 2 Kaj la urbo restis sieĝata ĝis la dek-
unua jaro de la reĝo Cidkija. 3 En la naŭa tago de
la kvara monato, kiam la malsato tiel fortiĝis en la
urbo, ke la popolo de la lando ne havis panon, 4 tiam
oni faris enrompon en la urbon; kaj ĉiuj militistoj
forkuris en la nokto laŭ la vojo de la pordego inter la
du muregoj apud la ĝardeno de la reĝo, kaj foriris
laŭ la vojo al la stepo. Kaj la Ĥaldeoj staris ĉirkaŭ
la urbo. 5 Kaj la militistaro de la Ĥaldeoj postkuris
la reĝon kaj kuratingis lin sur la stepo de Jeriĥo,
kaj lia tuta militistaro diskuris for de li. 6 Kaj ili
kaptis la reĝon kaj forkondukis lin al la reĝo de Babel
en Riblan, kaj oni faris pri li juĝon. 7 La filojn de
Cidkija oni buĉis antaŭ liaj okuloj, kaj al Cidkija oni
blindigis liajn okulojn, kaj oni ligis lin per kupraj
katenoj kaj forkondukis lin en Babelon. 8 En la kvina
monato, en la sepa tago de la monato, tio estas en
la dek-naŭa jaro de la reĝo Nebukadnecar, reĝo de
Babel, venis Nebuzaradan, estro de la korpogardistoj,
servanto de la reĝo de Babel, en Jerusalemon. 9 Kaj li
forbruligis la domon de la Eternulo kaj la domon de la
reĝo kaj ĉiujn domojn de Jerusalem; ĉiujn grandajn
domojn li forbruligis per fajro. 10 Kaj la muregojn
de Jerusalem ĉirkaŭe detruis la tuta militistaro de la
Ĥaldeoj, kiu estis kun la estro de la korpogardistoj.
11 La ceteran popolon, kiu restis en la urbo, kaj la
transkurintojn, kiuj transkuris al la reĝo de Babel, kaj
la ceteran popolamason forkondukis Nebuzaradan, la
estro de la korpogardistoj. 12 Sed iom el la malriĉuloj
de la lando la estro de la korpogardistoj restigis, ke

ili estu vinberistoj kaj terkultivistoj. 13 La kuprajn
kolonojn, kiuj estis en la domo de la Eternulo, kaj la
bazaĵojn kaj la kupran maron, kiuj estis en la domo de
la Eternulo, la Ĥaldeoj disrompis kaj forportis ilian
kupron en Babelon. 14 Kaj la potojn kaj la ŝovelilojn
kaj la tranĉilojn kaj la kulerojn kaj ĉiujn kuprajn
vazojn, kiuj estis uzataj ĉe la servado, ili forprenis.
15 Kaj la karbujojn kaj la aspergajn kalikojn, kiuj
estis aŭ el oro aŭ el arĝento, prenis la estro de la
korpogardistoj. 16 Koncerne la du kolonojn, la unu
maron, kaj la bazaĵojn, kiujn faris Salomono por la
domo de la Eternulo: la kvanto de la kupro en ĉiuj tiuj
iloj estis nemezurebla. 17 La alton de dek ok ulnoj
havis unu kolono; la kapitelo sur ĝi estis kupra, kaj la
alto de la kapitelo estis tri ulnoj, kaj ĉirkaŭ la kapitelo
estis kradaĵo kaj granatoj, ĉio el kupro; tiel same estis
ĉe la dua kolono, ankaŭ kun kradaĵo. 18 Kaj la estro
de la korpogardistoj prenis la ĉefpastron Seraja kaj
la duan pastron Cefanja kaj la tri pordogardistojn.
19 Kaj el la urbo li prenis unu korteganon, kiu estis
super la militistoj, kaj kvin virojn el la adjutantoj de
la reĝo, kiuj troviĝis en la urbo, kaj la skribiston de la
militestro, kiu enregistradis la militistojn el la popolo
de la lando, kaj sesdek homojn el la popolo de la lando,
kiuj troviĝis en la urbo. 20 Ilin prenis Nebuzaradan,
la estro de la korpogardistoj, kaj forkondukis al la
reĝo de Babel en Riblan. 21 Kaj la reĝo de Babel frapis
ilin kaj mortigis ilin en Ribla, en la lando Ĥamat.
Tiamaniere Jehuda estis elhejmigita el sia lando. 22
Super la popolo, kiu restis en la Juda lando kaj kiun
restigis Nebukadnecar, reĝo de Babel, li estrigis super
ili Gedaljan, filon de Aĥikam, filo de Ŝafan. 23 Kiam
ĉiuj militestroj, ili kaj iliaj homoj, aŭdis, ke la reĝo de
Babel estrigis Gedaljan, ili venis al Gedalja en Micpan,
nome: Iŝmael, filo de Netanja, kaj Joĥanan, filo de
Kareaĥ, kaj Seraja, filo de Tanĥumet, Netofaano, kaj
Jaazanja, filo de Maaĥatano, ili kaj iliaj homoj. 24 Kaj
Gedalja ĵuris al ili kaj al iliaj homoj, kaj diris al ili: Ne
timu esti subuloj de la Ĥaldeoj; loĝu en la lando kaj
servu al la reĝo de Babel, kaj estos al vi bone. 25 Sed
en la sepa monato venis Iŝmael, filo de Netanja, filo
de Eliŝama, el la reĝa idaro, kune kun dek viroj, kaj ili
frapis Gedaljan, kaj li mortis, ankaŭ la Judojn kaj la
Ĥaldeojn, kiuj estis kun li en Micpa. 26 Tiam leviĝis la
tuta popolo, de la malgrandaj ĝis la grandaj, kaj ankaŭ
la militestroj, kaj ili foriris en Egiptujon, ĉar ili timis la
Ĥaldeojn. 27 En la tridek-sepa jaro post la elpatrujigo
de Jehojaĥin, reĝo de Judujo, en la dek-dua monato,
en la dudek-sepa tago de la monato, Evil-Merodaĥ,
reĝo de Babel, en la jaro de sia reĝiĝo levis la kapon
de Jehojaĥin, reĝo de Judujo, el la malliberejo; 28 kaj
li parolis kun li afable, kaj starigis lian tronon pli
alte ol la tronoj de la aliaj reĝoj, kiuj estis ĉe li en
Babel; 29 kaj li ŝanĝis liajn vestojn de malliberejo; kaj
li manĝadis ĉiam ĉe li dum sia tuta vivo; 30 kaj liaj
vivrimedoj, vivrimedoj konstantaj, estis donataj al li
de la reĝo ĉiutage dum lia tuta vivo.

# 1 Kroniko

**1** Adam, Set, Enoŝ, **2** Kenan, Mahalalel, Jared, **3**
Ĥanoĥ, Metuŝelaĥ, Lemeĥ, **4** Noa, Ŝem, Ĥam, kaj
Jafet. **5** La filoj de Jafet: Gomer, Magog, Madaj, Javan,
Tubal, Meŝeĥ, kaj Tiras. **6** La filoj de Gomer: Aŝkenaz,
Rifat, kaj Togarma. **7** La filoj de Javan: Eliŝa, Tarŝiŝ,
Kitim, kaj Dodanim. **8** La filoj de Ĥam: Kuŝ, Micraim,
Put, kaj Kanaan. **9** La filoj de Kuŝ: Seba, Ĥavila, Sabta,
Raama, kaj Sabteĥa. La filoj de Raama: Ŝeba kaj Dedan.
**10** Kuŝ naskigis ankaŭ Nimrodon; ĉi tiu komencis esti
potenculo sur la tero. **11** Micraim naskigis la Ludidojn,
la Anamidojn, la Lehabidojn, la Naftuĥidojn, **12** la
Patrusidojn, la Kasluĥidojn (de kiuj devenis la Filiŝtoj),
kaj la Kaftoridojn. **13** De Kanaan naskiĝis Cidon, lia
unuenaskito, kaj Ĥet, **14** la Jebusidoj, la Amoridoj, la
Girgaŝidoj, **15** la Ĥividoj, la Arkidoj, la Sinidoj, **16** la
Arvadidoj, la Cemaridoj, la Ĥamatidoj. **17** La filoj de
Ŝem: Elam, Aŝur, Arpaĥŝad, Lud, Aram, Uc, Ĥul, Geter,
kaj Meŝeĥ. **18** De Arpaĥŝad naskiĝis Ŝelaĥ, de Ŝelaĥ
naskiĝis Eber. **19** Al Eber naskiĝis du filoj: la nomo de
unu estis Peleg, ĉar en lia tempo estis dividita la tero;
la nomo de lia frato estis Joktan. **20** De Joktan naskiĝis
Almodad, Ŝelef, Ĥacarmavet, Jeraĥ, **21** Hadoram, Uzal,
Dikla, **22** Ebal, Abimael, Ŝeba, **23** Ofir, Ĥavila, kaj Jobab.
Ĉiuj ĉi tiuj estis la filoj de Joktan. **24** Ŝem, Arpaĥŝad,
Ŝelaĥ, **25** Eber, Peleg, Reu, **26** Serug, Naĥor, Teraĥ, **27**
Abram (tio estas Abraham). **28** La filoj de Abraham:
Isaak kaj Iŝmael. **29** Jen estas ilia genealogio: de Iŝmael,
la unuenaskito Nebajot, poste Kedar, Adbeel, Mibsam,
**30** Miŝma, Duma, Masa, Ĥadad, Tema, **31** Jetur, Nafiŝ,
kaj Kedma. Tio estas la filoj de Iŝmael. **32** La filoj
de Ketura, kromvirino de Abraham, kiujn ŝi naskis:
Zimran, Jokŝan, Medan, Midjan, Jiŝbak, kaj Ŝuaĥ. Kaj
la filoj de Jokŝan estis Ŝeba kaj Dedan. **33** La filoj de
Midjan: Efa, Efer, Ĥanoĥ, Abida, kaj Eldaa. Ĉiuj ĉi tiuj
estis la filoj de Ketura. **34** Abraham naskigis Isaakon.
La filoj de Isaak: Esav kaj Izrael. **35** La filoj de Esav:
Elifaz, Reuel, Jeuŝ, Jalam, kaj Koraĥ. **36** La filoj de
Elifaz: Teman, Omar, Cefi, Gatam, Kenaz, Timna, kaj
Amalek. **37** La filoj de Reuel: Naĥat, Zeraĥ, Ŝama, kaj
Miza. **38** La filoj de Seir: Lotan, Ŝobal, Cibeon, Ana,
Diŝon, Ecer, kaj Diŝan. **39** La filoj de Lotan: Ĥori kaj
Homam; la fratino de Lotan estis Timna. **40** La filoj de
Ŝobal: Aljan, Manaĥat, Ebal, Ŝefi, kaj Onam. La filoj
de Cibeon: Aja kaj Ana. **41** La filoj de Ana: Diŝon. La
filoj de Diŝon: Ĥamran, Eŝban, Jitran, kaj Keran. **42** La
filoj de Ecer: Bilhan, Zaavan, kaj Jaakan. La filoj de
Diŝan: Uc kaj Aran. **43** Jen estas la reĝoj, kiuj reĝis en
la lando de Edom, antaŭ ol aperis reĝo ĉe la Izraelidoj:
Bela, filo de Beor; la nomo de lia urbo estis Dinhaba.
**44** Kaj Bela mortis, kaj anstataŭ li ekreĝis Jobab, filo
de Zeraĥ, el Bocra. **45** Kaj Joab mortis, kaj anstataŭ li
ekreĝis Ĥuŝam, el la lando de la Temanidoj. **46** Kaj
Ĥuŝam mortis, kaj anstataŭ li ekreĝis Hadad, filo de
Bedad, kiu venkobatis la Midjanidojn sur la kampo de
Moab; la nomo de lia urbo estis Avit. **47** Kaj Hadad
mortis, kaj anstataŭ li ekreĝis Samla el Masreka. **48** Kaj
Samla mortis, kaj anstataŭ li ekreĝis Ŝaul el Reĥobot
ĉe la Rivero. **49** Kaj Ŝaul mortis, kaj anstataŭ li ekreĝis
Baal-Ĥanan, filo de Aĥbor. **50** Kaj Baal-Ĥanan mortis,
kaj anstataŭ li ekreĝis Hadad; la nomo de lia urbo
estis Pai; la nomo de lia edzino estis Mehetabel, filino
de Matred, filino de Me-Zahab. **51** Kaj Hadad mortis.
Tiam la ĉefoj de Edom estis: ĉefo Timna, ĉefo Alva,
ĉefo Jetet, **52** ĉefo Oholibama, ĉefo Ela, ĉefo Pinon, **53**
ĉefo Kenaz, ĉefo Teman, ĉefo Mibcar, **54** ĉefo Magdiel,
ĉefo Iram. Tio estas la ĉefoj de Edom.

**2** Jen estas la filoj de Izrael: Ruben, Simeon, Levi,
Jehuda, Isaĥar, Zebulun, **2** Dan, Jozef, Benjamen,
Naftali, Gad, kaj Aŝer. **3** La filoj de Jehuda: Er, Onan,
kaj Ŝela, tri naskiĝis al li de Bat-Ŝua, la Kanaanidino.
Er, la unuenaskito de Jehuda, estis malbona antaŭ
la Eternulo, kaj Li mortigis lin. **4** Kaj lia bofilino
Tamar naskis al li Perecon kaj Zeraĥon. La nombro
de ĉiuj filoj de Jehuda estis kvin. **5** La filoj de Perec:
Ĥecron kaj Ĥamul. **6** La filoj de Zeraĥ: Zimri, Etan,
Heman, Kalkol, kaj Dara; da ili ĉiuj estis kvin. **7** La
filoj de Karmi: Aĥan, kiu malĝojigis Izraelon, pekinte
kontraŭ anatemaĵo. **8** La filoj de Etan: Azarja. **9** La
filoj de Ĥecron, kiuj naskiĝis al li: Jeraĥmeel, Ram,
kaj Kelubaj. **10** Ram naskigis Aminadabon; Aminadab
naskigis Naĥŝonon, princon de la idoj de Jehuda;
**11** Naĥŝon naskigis Salman; Salma naskigis Boazon;
**12** Boaz naskigis Obedon; Obed naskigis Jiŝajon; **13**
Jiŝaj naskigis sian unuenaskiton Eliab, la dua estis
Abinadab, la tria estis Ŝimea, **14** la kvara estis Netanel,
la kvina estis Radaj, **15** la sesa estis Ocem, la sepa
estis David. **16** Iliaj fratinoj estis: Ceruja kaj Abigail.
La filoj de Ceruja estis: Abiŝaj, Joab, kaj Asahel — tri.
**17** Abigail naskis Amasan; la patro de Amasa estis
Jeter, Iŝmaelido. **18** Kaleb, filo de Ĥecron, naskigis
de sia edzino Azuba kaj de Jeriot; jen estas ŝiaj filoj:

Jeŝer, Ŝobab, kaj Ardon. 19 Kiam mortis Azuba, Kaleb
prenis al si Efratan, kaj ŝi naskis al li Ĥuron. 20 Ĥur
naskigis Urin; kaj Uri naskigis Becalelon. 21 Poste
Ĥecron envenis al la filino de Maĥir, patro de Gilead;
li prenis ŝin, kiam li havis la aĝon de sesdek jaroj, kaj
ŝi naskis al li Segubon. 22 Segub naskigis Jairon, kaj li
havis dudek tri urbojn en la lando Gilead. 23 Sed la
Geŝuranoj kaj Sirianoj forprenis de ili la Vilaĝojn de
Jair, Kenaton kaj ĝiajn dependaĵojn, sesdek urbetojn.
Ĉiuj ĉi tiuj estis la filoj de Maĥir, patro de Gilead. 24
Post la morto de Ĥecron en Kaleb-Efrata la edzino
de Ĥecron, Abija, naskis al li Aŝĥuron, la fondinton
de Tekoa. 25 La filoj de Jeraĥmeel, unuenaskito de
Ĥecron, estis: la unuenaskito Ram, poste Buna, Oren,
Ocem, kaj Aĥija. 26 Jeraĥmeel havis ankaŭ alian
edzinon, ŝia nomo estis Atara; ŝi estis la patrino de
Onam. 27 La filoj de Ram, la unuenaskito de Jeraĥmeel,
estis: Maac, Jamin, kaj Eker. 28 La filoj de Onam
estis: Ŝamaj kaj Jada. La filoj de Ŝamaj estis: Nadab
kaj Abiŝur. 29 La nomo de la edzino de Abiŝur estis
Abiĥail; ŝi naskis al li Aĥbanon kaj Molidon. 30 La
filoj de Nadab estis: Seled kaj Apaim. Seled mortis
sen infanoj. 31 La filo de Apaim estis Jiŝei. La filo de
Jiŝei estis Ŝeŝan. La filo de Ŝeŝan estis Aĥlaj. 32 La
filoj de Jada, frato de Ŝamaj, estis: Jeter kaj Jonatan.
Jeter mortis sen infanoj. 33 La filoj de Jonatan estis:
Pelet kaj Zaza. Tio estis la idoj de Jeraĥmeel. 34 Ŝeŝan
ne havis filojn, sed nur filinojn. Ŝeŝan havis sklavon
Egipton, kies nomo estis Jarĥa; 35 kaj Ŝeŝan donis
sian filinon kiel edzinon al sia sklavo Jarĥa, kaj ŝi
naskis al li Atajon. 36 Ataj naskigis Natanon; kaj Natan
naskigis Zabadon. 37 Zabad naskigis Eflalon; kaj Eflal
naskigis Obedon. 38 Obed naskigis Jehun, kaj Jehu
naskigis Azarjan. 39 Azarja naskigis Ĥelecon; kaj Ĥelec
naskigis Eleasan. 40 Eleasa naskigis Sismajon; kaj
Sismaj naskigis Ŝalumon. 41 Ŝalum naskigis Jekamjan;
kaj Jekamja naskigis Eliŝaman. 42 La filoj de Kaleb,
frato de Jeraĥmeel: lia unuenaskito Meŝa, kiu estis la
fondinto de Zif; kaj la filoj de Mareŝa, fondinto de
Ĥebron. 43 La filoj de Ĥebron: Koraĥ, Tapuaĥ, Rekem,
kaj Ŝema. 44 Ŝema naskigis Raĥamon, fondinton de
Jorkeam; kaj Rekem naskigis Ŝamajon. 45 La filo de
Ŝamaj estis Maon; kaj Maon estis la fondinto de Bet-
Cur. 46 Kaj Efa, kromvirino de Kaleb, naskis Ĥaranon,
Mocan, kaj Gazezon; kaj Ĥaran naskigis Gazezon. 47 La
filoj de Jedaj estis: Regem, Jotam, Geŝan, Pelet, Efa, kaj
Ŝaaf. 48 Maaĥa, kromvirino de Kaleb, naskis Ŝeberon
kaj Tirĥanan. 49 Ŝi naskis ankaŭ Ŝaafon, la fondinton
de Madmana, Ŝevan, la fondinton de Maĥbena kaj la
fondinton de Gibea. La filino de Kaleb estis Aĥsa. 50
Tio estis la idoj de Kaleb: la filo de Ĥur, unuenaskito
de Efrata: Ŝobal, fondinto de Kirjat-Jearim, 51 Salma,
fondinto de Bet-Leĥem, Ĥaref, fondinto de Bet-Gader.
52 Ŝobal, fondinto de Kirjat-Jearim, havis la filojn:
Haroe, duono de la Menuĥot. 53 La familioj de Kirjat-
Jearim estis: la Jetridoj, la Putidoj, la Ŝumatidoj,
la Miŝraidoj. De ĉi tiuj devenis la Coreaidoj kaj la
Eŝtaolidoj. 54 La idoj de Salma: la Bet-Leĥemanoj, la
Netofaanoj, la Atrotanoj de la domo de Joab, la duono
de la Manaĥatanoj, la Coreanoj; 55 kaj la familioj de la
skribistoj, kiuj loĝis en Jabec, la Tiratidoj, Ŝimeatidoj,
kaj Suĥatidoj; tio estis la Kenidoj, kiuj devenis de
Ĥamat, la fondinto de Bet-Reĥab.

**3** Jen estas la filoj de David, kiuj naskiĝis al li en
Ĥebron: la unuenaskito Amnon, de la Jizreelanino
Aĥinoam; la dua estis Daniel, de la Karmelanino
Abigail; 2 la tria estis Abŝalom, filo de Maaĥa, filino
de Talmaj, reĝo de Geŝur; la kvara estis Adonija, filo
de Ĥagit; 3 la kvina estis Ŝefatja, de Abital; la sesa
estis Jitream, de lia edzino Egla; 4 ses naskiĝis al li en
Ĥebron. Li reĝis tie sep jarojn kaj ses monatojn; kaj
tridek tri jarojn li reĝis en Jerusalem. 5 Kaj jen estas
tiuj, kiuj naskiĝis al li en Jerusalem: Ŝimea, Ŝobab,
Natan, Salomono — ĉi tiuj kvar de Bat-Ŝua, filino
de Amiel; 6 Jibĥar, Eliŝama, Elifelet, 7 Noga, Nefeg,
Jafia, 8 Eliŝama, Eljada, kaj Elifelet — naŭ. 9 Tio estas
ĉiuj filoj de David, krom la filoj de kromvirinoj; kaj
ilia fratino estis Tamar. 10 La filo de Salomono estis
Reĥabeam; la filo de ĉi tiu estis Abija; la filo de ĉi
tiu: Asa; la filo de ĉi tiu: Jehoŝafat; 11 la filo de ĉi tiu:
Joram; la filo de ĉi tiu: Aĥazja; la filo de ĉi tiu: Joaŝ; 12
la filo de ĉi tiu: Amacja; la filo de ĉi tiu: Azarja; la filo
de ĉi tiu: Jotam; 13 la filo de ĉi tiu: Aĥaz; la filo de ĉi
tiu: Ĥizkija; la filo de ĉi tiu: Manase; 14 la filo de ĉi
tiu: Amon; la filo de ĉi tiu: Joŝija. 15 La filoj de Joŝija
estis: la unuenaskito Joĥanan, la dua Jehojakim, la
tria Cidkija, la kvara Ŝalum. 16 La filoj de Jehojakim:
lia filo Jeĥonja, lia filo Cidkija. 17 La filoj de Jeĥonja:
Asir, lia filo Ŝealtiel, 18 Malkiram, Pedaja, Ŝenacar,
Jekamja, Ĥoŝama, kaj Nedabja. 19 La filoj de Pedaja:
Zerubabel kaj Ŝimei. La filoj de Zerubabel: Meŝulam,
Ĥananja; ilia fratino estis Ŝelomit; 20 ankaŭ ĉi tiuj
kvin: Ĥaŝuba, Ohel, Bereĥja, Ĥasadja, kaj Juŝab-Ĥesed.

21 La idoj de Ĥananja: Pelatja kaj Jeŝaja; la filoj de
Refaja, la filoj de Arnan, la filoj de Obadja, la filoj de
Ŝeĥanja. 22 La filo de Ŝeĥanja estis Ŝemaja; la filoj de
Ŝemaja: Ĥatuŝ, Jigal, Bariaĥ, Nearja, kaj Ŝafat — ses. 23
La filoj de Nearja: Eljoenaj, Ĥizkija, kaj Azrikam — tri.
24 La filoj de Eljoenaj: Hodavja, Eljaŝib, Pelaja, Akub,
Joĥanan, Delaja, kaj Anani — sep.

4 La filoj de Jehuda estis: Perec, Ĥecron, Karmi, Ĥur,
kaj Ŝobal. 2 Reaja, filo de Ŝobal, naskigis Jaĥaton;
Jaĥat naskigis Aĥumajon kaj Lahadon; tio estas la
familioj de la Coreaidoj. 3 Kaj jen estas la domanaro
de Etam: Jizreel, Jiŝma, Jidbaŝ; la nomo de ilia fratino
estis Haclelponi; 4 kaj Penuel, la fondinto de Gedor,
kaj Ezer, la fondinto de Ĥuŝa. Tio estas la idoj de Ĥur,
unuenaskito de Efrata, posedanto de Bet-Leĥem. 5
Aŝĥur, fondinto de Tekoa, havis du edzinojn: Ĥela
kaj Naara. 6 Naara naskis al li Aĥuzamon, Ĥeferon,
Temnin, kaj Aĥaŝtarin; tio estas la filoj de Naara; 7
la filoj de Ĥela estis: Ceret, Coĥar, kaj Etnan. 8 Koc
naskigis Anubon, Cobeban, kaj la familiojn de Aĥarĥel,
filo de Harum. 9 Jabec estis la plej estimata inter
siaj fratoj. Lia patrino donis al li la nomon Jabec,
ĉar ŝi diris: En malĝojo mi naskis. 10 Kaj Jabec vokis
al Dio de Izrael, dirante: Ho, se Vi min benus kaj
vastigus miajn limojn, kaj Via mano estus kun mi kaj
forigus la malbonon, por ke mi ne havu aflikton! Kaj
Dio plenumis tion, pri kio li petis. 11 Kelub, frato de
Ŝuĥa, naskigis Meĥiron; ĉi tiu estis la patro de Eŝton.
12 Eŝton naskigis Bet-Rafan, Paseaĥon, kaj Teĥinan,
fondinton de la urbo Naĥaŝ; tio estas la loĝantoj de
Reĥa. 13 La filoj de Kenaz estis: Otniel kaj Seraja; la
filo de Otniel estis Ĥatat. 14 Meonotaj naskigis Ofran,
kaj Seraja naskigis Joabon, fondinton de la Valo de
Ĉarpentistoj; ĉar ili estis ĉarpentistoj. 15 La filoj de
Kaleb, filo de Jefune: Iru, Ela, kaj Naam; la filo de Ela
estis Kenaz. 16 La filoj de Jehalelel: Zif, Zifa, Tirja,
kaj Asarel. 17 La filoj de Ezra: Jeter, Mered, Efer, kaj
Jalon. Ŝi naskis Mirjamon, Ŝamajon, kaj Jiŝbaĥon, la
patron de Eŝtemoa; 18 dum lia edzino la Judino naskis
Jeredon, fondinton de Gedor, Ĥeberon, fondinton
de Soĥo, kaj Jekutielon, fondinton de Zanoaĥ. Tiuj
estis la filoj de Bitja, filino de Faraono, kiun prenis
Mered. 19 La filoj de la edzino de Hodija, fratino de
Naĥam: la patro de Keila, la Garmano, kaj Eŝtemoa, la
Maaĥatano. 20 La filoj de Ŝimon: Amnon, Rina, Ben-
Ĥanan, kaj Tilon; la filoj de Jiŝei: Zoĥet kaj Ben-Zoĥet.
21 La filoj de Ŝela, filo de Jehuda: Er, patro de Leĥa, kaj
Lada, patro de Mareŝa, kaj la familioj de la tolfaristoj
el la domo de Aŝbea; 22 kaj Jokim, kaj la loĝantoj
de Kozeba, kaj Joaŝ, kaj Saraf, kiuj estis sinjoroj en
Moab kaj poste revenis en Bet-Leĥemon, laŭ antikvaj
rakontoj. 23 Ili estis potistoj, kaj loĝis inter ĝardenoj
kaj brutejoj; ĉe la reĝo ili tie loĝis por liaj laboroj. 24
La filoj de Simeon: Nemuel, Jamin, Jarib, Zeraĥ, kaj
Ŝaul. 25 La filo de ĉi tiu estis Ŝalum; la filo de ĉi tiu
estis Mibsam; la filo de ĉi tiu estis Miŝma. 26 La filoj
de Miŝma: lia filo Ĥamuel, lia filo Zakur, lia filo Ŝimei.
27 Ŝimei havis dek ses filojn kaj ses filinojn; sed liaj
fratoj ne havis multe da filoj, kaj ilia tuta parencaro
ne tiel multiĝis, kiel la idaro de Jehuda. 28 Ili loĝis
en Beer-Ŝeba, Molada, kaj Ĥacar-Ŝual, 29 en Bilha,
Ecem, kaj Tolad, 30 en Betuel, Ĥorma, kaj Ciklag, 31 en
Bet-Markabot, Ĥacar-Susim, Bet-Biri, kaj Ŝaaraim. Tio
estis iliaj urboj ĝis la reĝado de David. 32 Iliaj vilaĝoj
estis: Etam, Ain, Rimon, Toĥen, kaj Aŝan, kvin urboj;
33 kaj ĉiuj iliaj vilaĝoj, kiuj estis ĉirkaŭ tiuj urboj,
ĝis Baal. Tie estis ilia loĝloko, kaj ili havis apartan
genealogian registron. 34 Kaj Meŝobab, Jamleĥ, Joŝa,
filo de Amacja, 35 Joel, Jehu, filo de Joŝibja, filo de
Seraja, filo de Asiel, 36 Eljoenaj, Jaakoba, Jeŝoĥaja,
Asaja, Adiel, Jesimiel, Benaja, 37 Ziza, filo de Ŝifi, filo
de Alon, filo de Jedaja, filo de Ŝimri, filo de Ŝemaja.
38 Ĉi tiuj, cititaj laŭ iliaj nomoj, estis princoj en siaj
familioj, kaj iliaj patrodomoj forte vastiĝis. 39 Ili iris
ĝis Gedor, ĝis la orienta flanko de la valo, por serĉi
paŝtejon por siaj ŝafoj; 40 kaj ili trovis paŝtejon grasan
kaj bonan, kaj teron vastan, trankvilan, kaj kvietan,
ĉar el la Ĥamidoj estis tiuj, kiuj tie loĝis antaŭe. 41 Kaj
venis tiuj, kiuj ĵus estas cititaj, en la tempo de Ĥizkija,
reĝo de Judujo, kaj disbatis iliajn tendojn, kaj ankaŭ la
Meunojn, kiuj tie troviĝis, kaj ekstermis ilin por ĉiam
kaj ekloĝis sur ilia loko, ĉar tie estis paŝtejo por iliaj
ŝafoj. 42 Kaj el ili, el la idoj de Simeon, kvincent homoj
iris al la monto Seir; iliaj estroj estis Pelatja, Nearja,
Refaja, kaj Uziel, filoj de Jiŝei. 43 Kaj ili venkobatis la
restintajn saviĝintojn de Amalek kaj ekloĝis tie por
ĉiam.

5 La filoj de Ruben, unuenaskito de Izrael. (Li estis
la unuenaskito; sed kiam li malhonoris la liton de
sia patro, lia unuenaskiteco estis fordonita al la filoj
de Jozef, filo de Izrael, kaj li ne estis enskribita en la
genealogian liston kiel unuenaskito; 2 Jehuda estis la

plej potenca inter siaj fratoj, kaj la reganto devenis de
li; sed la unuenaskiteco estis donita al Jozef.) 3 La filoj
de Ruben, unuenaskito de Izrael: Ĥanoĥ, Palu, Ĥecron,
kaj Karmi. 4 La idoj de Joel: lia filo estis Ŝemaja, lia
filo estis Gog, lia filo estis Ŝimei, 5 lia filo estis Miĥa,
lia filo estis Reaja, lia filo estis Baal, 6 lia filo estis
Beera, kiun forkondukis en kaptitecon Tiglat-Pileser,
reĝo de Asirio. Li estis princo de la Rubenidoj. 7 Kaj
liaj fratoj, laŭ iliaj familioj, laŭ ilia genealogia listo,
estis: Jeiel, la ĉefo, Zeĥarja, 8 kaj Bela, filo de Azaz,
filo de Ŝema, filo de Joel. Li loĝis en Aroer, ĝis Nebo
kaj Baal-Meon. 9 Oriente li loĝis ĝis la komenco de
la dezerto ĉe la rivero Eŭfrato; ĉar ili havis multe
da brutoj en la lando Gilead. 10 En la tempo de Saul
ili militis kontraŭ la Hagaridoj, kaj ĉi tiuj enfalis en
iliajn manojn; kaj ili ekloĝis en la tendoj de tiuj en
la tuta orienta parto de Gilead. 11 La idoj de Gad
loĝis apude de ili, en la lando Baŝan, ĝis Salĥa; 12
la ĉefo estis Joel, la dua estis Ŝafam, poste Janaj kaj
Ŝafat en Baŝan. 13 Iliaj fratoj, laŭ iliaj patrodomoj:
Miĥael, Meŝulam, Ŝeba, Joraj, Jakan, Zia, kaj Eber —
sep. 14 Jen estas la filoj de Abiĥail, filo de Ĥuri, filo de
Jaroaĥ, filo de Gilead, filo de Miĥael, filo de Jeŝiŝaj,
filo de Jaĥdo, filo de Buz; 15 Aĥi, filo de Abdiel, filo de
Guni, estis ĉefo de ilia patrodomo. 16 Kaj ili loĝis en
Gilead en Baŝan kaj ĝiaj filinurboj, kaj sur ĉiuj kampoj
de Ŝaron, ĝis iliaj finoj. 17 Ĉiuj ili estis genealogie
enskribitaj en la tempo de Jotam, reĝo de Judujo, kaj
en la tempo de Jerobeam, reĝo de Izrael. 18 La idoj de
Ruben kaj la Gadidoj kaj la duontribo de Manase havis
da batalkapablaj viroj, portantaj ŝildon kaj glavon,
streĉantaj pafarkon, kaj instruitaj por milito, kvardek
kvar mil sepcent sesdek, elirantojn en militistaro. 19
Ili militis kontraŭ la Hagaridoj, kontraŭ Jetur, Nafiŝ,
kaj Nodab. 20 Kaj ili ricevis helpon kontraŭ ĉi tiuj; kaj
la Hagaridoj, kun ĉio, kion ili havis, estis transdonitaj
en iliajn manojn. Ĉar dum la milito ili vokis al Dio,
kaj Li aŭskultis ilian preĝon pro tio, ke ili fidis Lin.
21 Kaj ili forkaptis la brutojn de tiuj, kvindek mil
kamelojn, ducent kvindek mil ŝafojn, du mil azenojn,
kaj cent mil homojn. 22 Multe da mortigitoj falis, ĉar
de Dio estis la milito. Kaj ili loĝis sur ilia loko ĝis la
elpatrujigo. 23 La idoj de la duontribo de Manase loĝis
en la lando de Baŝan ĝis Baal-Ĥermon, Senir, kaj la
monto Ĥermon. Ili estis en granda nombro. 24 Kaj
jen estas la ĉefoj de iliaj patrodomoj: Efer, Jiŝei, Eliel,
Azriel, Jeremia, Hodavja, kaj Jaĥdiel, viroj potencaj,
viroj famaj, ĉefoj de siaj patrodomoj. 25 Sed ili defalis
de Dio de iliaj patroj, kaj malĉaste sekvis la diojn de la
enlandaj popoloj, kiujn Dio ekstermis antaŭ ili; 26
tial Dio de Izrael ekscitis kontraŭ ili la spiriton de
Pul, reĝo de Asirio, kaj la spiriton de Tiglat-Pileser,
reĝo de Asirio, kaj li elpatrujigis la Rubenidojn, la
Gadidojn, kaj la duontribon de la Manaseidoj, kaj
forkondukis ilin en Ĥalaĥon, Ĥaboron, Haran, kaj al la
rivero Gozan ĝis la nuna tago.

6 La filoj de Levi: Gerŝon, Kehat, kaj Merari. 2 La filoj
de Kehat: Amram, Jichar, Ĥebron, kaj Uziel. 3 La
infanoj de Amram: Aaron, Moseo, kaj Mirjam; kaj la
filoj de Aaron: Nadab, Abihu, Eleazar, kaj Itamar. 4
Eleazar naskigis Pineĥason, Pineĥas naskigis Abiŝuan,
5 Abiŝua naskigis Bukin, Buki naskigis Uzin, 6 Uzi
naskigis Zeraĥjan, Zeraĥja naskigis Merajoton, 7
Merajot naskigis Amarjan, Amarja naskigis Aĥitubon,
8 Aĥitub naskigis Cadokon, Cadok naskigis Aĥimaacon,
9 Aĥimaac naskigis Azarjan, Azarja naskigis Joĥananon,
10 Joĥanan naskigis Azarjan (li estis tiu, kiu estis pastro
en la domo, kiun Salomono konstruis en Jerusalem),
11 Azarja naskigis Amarjan, Amarja naskigis Aĥitubon,
12 Aĥitub naskigis Cadokon, Cadok naskigis Ŝalumon,
13 Ŝalum naskigis Ĥilkijan, Ĥilkija naskigis Azarjan, 14
Azarja naskigis Serajan, Seraja naskigis Jehocadakon.
15 Jehocadak iris en kaptitecon, kiam la Eternulo
elpatrujigis la Judojn kaj la Jerusalemanojn per
Nebukadnecar. 16 La filoj de Levi: Gerŝon, Kehat, kaj
Merari. 17 Jen estas la nomoj de la filoj de Gerŝon:
Libni kaj Ŝimei. 18 La filoj de Kehat: Amram, Jichar,
Ĥebron, kaj Uziel. 19 La filoj de Merari: Maĥli kaj Muŝi.
Kaj jen estas la familioj de Levi laŭ iliaj patrodomoj:
20 la idoj de Gerŝon: Libni; lia filo: Jaĥat; lia filo: Zima;
21 lia filo: Joaĥ; lia filo: Ido; lia filo: Zeraĥ; lia filo:
Jeatraj. 22 La idoj de Kehat: lia filo: Aminadab; lia filo:
Koraĥ; lia filo: Asir; 23 lia filo: Elkana; lia filo: Ebjasaf;
lia filo: Asir; 24 lia filo: Taĥat; lia filo: Uriel; lia filo:
Uzija; lia filo: Ŝaul. 25 La filoj de Elkana: Amasaj kaj
Aĥimot. 26 Elkana: la idoj de Elkana: lia filo: Cofaj; lia
filo: Naĥat; 27 lia filo: Eliab; lia filo: Jeroĥam; lia filo:
Elkana. 28 La filoj de Samuel: la unuenaskito Vaŝni, kaj
Abija. 29 La idoj de Merari: Maĥli; lia filo: Libni; lia filo:
Ŝimei; lia filo: Uza; 30 lia filo: Ŝimea; lia filo: Ĥagija;
lia filo: Asaja. 31 Jen estas tiuj, kiujn David starigis
por kantado en la domo de la Eternulo de post la
tempo, kiam la sankta kesto trovis tie ripozejon; 32 ili
servadis antaŭ la tabernaklo de kunveno per kantado,

ĝis Salomono konstruis la domon de la Eternulo en
Jerusalem; kaj ili stariĝadis al sia servado laŭ sia
regularo; 33 jen estas tiuj, kiuj stariĝadis, kaj iliaj filoj:
el la Kehatidoj estis la kantisto Heman, filo de Joel,
filo de Samuel, 34 filo de Elkana, filo de Jeroĥam, filo
de Eliel, filo de Toaĥ, 35 filo de Cuf, filo de Elkana, filo
de Maĥat, filo de Amasaj, 36 filo de Elkana, filo de
Joel, filo de Azarja, filo de Cefanja, 37 filo de Taĥat,
filo de Asir, filo de Ebjasaf, filo de Koraĥ, 38 filo de
Jichar, filo de Kehat, filo de Levi, filo de Izrael. 39
Kaj lia frato Asaf, kiu staradis dekstre de li, Asaf, filo
de Bereĥja, filo de Ŝimea, 40 filo de Miĥael, filo de
Baaseja, filo de Malkija, 41 filo de Etni, filo de Zeraĥ,
filo de Adaja, 42 filo de Etan, filo de Zima, filo de
Ŝimei, 43 filo de Jaĥat, filo de Gerŝon, filo de Levi.
44 La idoj de Merari, iliaj fratoj, staradis maldekstre:
Etan, filo de Kiŝi, filo de Abdi, filo de Maluĥ, 45 filo
de Ĥaŝabja, filo de Amacja, filo de Ĥilkija, 46 filo de
Amci, filo de Bani, filo de Ŝemer, 47 filo de Maĥli,
filo de Muŝi, filo de Merari, filo de Levi. 48 Kaj iliaj
fratoj, la Levidoj, estis destinitaj por ĉiuj servoj en la
tabernaklo de la domo de Dio. 49 Aaron kaj liaj filoj
incensadis sur la altaro de bruloferoj kaj sur la altaro
de incensado; ili estis destinitaj por ĉiuj servoj en la
plejsanktejo, kaj por pekliberigi Izraelon, konforme
al ĉio, kion ordonis Moseo, servanto de Dio. 50 Kaj
jen estas la idoj de Aaron: lia filo: Eleazar; lia filo:
Pineĥas; lia filo: Abiŝua; 51 lia filo: Buki; lia filo: Uzi;
lia filo: Zeraĥja; 52 lia filo: Merajot; lia filo: Amarja; lia
filo: Aĥitub; 53 lia filo: Cadok; lia filo: Aĥimaac. 54 Kaj
jen estas iliaj loĝlokoj, laŭ iliaj vilaĝoj en iliaj limoj:
al la idoj de Aaron, al la familioj de la Kehatidoj, ĉar
al ili destinis la loto, 55 oni donis Ĥebronon, en la
lando de Jehuda, kaj ĝiajn antaŭurbojn ĉirkaŭ ĝi; 56
sed la kampon de tiu urbo kaj ĝiajn vilaĝojn oni donis
al Kaleb, filo de Jefune. 57 Al la idoj de Aaron oni
donis la urbojn de rifuĝo: Ĥebronon, Libnan kaj ĝiajn
antaŭurbojn, Jatiron, Eŝtemoan kaj ĝiajn antaŭurbojn,
58 Ĥilenon kaj ĝiajn antaŭurbojn, Debiron kaj ĝiajn
antaŭurbojn, 59 Aŝanon kaj ĝiajn antaŭurbojn, Bet-
Ŝemeŝon kaj ĝiajn antaŭurbojn; 60 kaj de la tribo de
Benjamen: Geban kaj ĝiajn antaŭurbojn, Alemeton kaj
ĝiajn antaŭurbojn, kaj Anatoton kaj ĝiajn antaŭurbojn.
La nombro de ĉiuj iliaj urboj en iliaj familioj estis
dek tri urboj. 61 Al la idoj de Kehat, kiuj restis el
la familio de la tribo, oni donis de la duontribo de
Manase laŭlote dek urbojn. 62 Al la idoj de Gerŝon
laŭ iliaj familioj oni donis de la tribo Isaĥar, de la
tribo Aŝer, de la tribo Naftali, kaj de la tribo Manase
en Baŝan dek tri urbojn. 63 Al la idoj de Merari laŭ
iliaj familioj oni donis de la tribo Ruben, de la tribo
Gad, kaj de la tribo Zebulun laŭlote dek du urbojn.
64 Kaj la Izraelidoj donis al la Levidoj la urbojn kaj
iliajn antaŭurbojn. 65 Ili donis laŭlote de la tribo
de la Jehudaidoj, de la tribo de la Simeonidoj, kaj
de la tribo de la Benjamenidoj tiujn urbojn, kiujn
ili nomis laŭ la nomoj. 66 Al kelkaj familioj el la
idoj de Kehat oni donis urbojn, apartenontajn al ili,
de la tribo Efraim. 67 Kaj oni donis al ili la urbojn
de rifuĝo: Ŝeĥemon kaj ĝiajn antaŭurbojn, sur la
monto de Efraim, Gezeron kaj ĝiajn antaŭurbojn, 68
Jokmeamon kaj ĝiajn antaŭurbojn, Bet-Ĥoronon kaj
ĝiajn antaŭurbojn, 69 Ajalonon kaj ĝiajn antaŭurbojn,
Gat-Rimonon kaj ĝiajn antaŭurbojn; 70 kaj de la
duontribo de Manase: Aneron kaj ĝiajn antaŭurbojn,
Bileamon kaj ĝiajn antaŭurbojn. Tio estis por la
restintaj familioj de la Kehatidoj. 71 Al la idoj de
Gerŝon oni donis de la familioj de la duontribo de
Manase: Golanon en Baŝan kaj ĝiajn antaŭurbojn,
kaj Aŝtaroton kaj ĝiajn antaŭurbojn; 72 de la tribo
Isaĥar: Kedeŝon kaj ĝiajn antaŭurbojn, Dabraton kaj
ĝiajn antaŭurbojn, 73 Ramoton kaj ĝiajn antaŭurbojn,
kaj Anemon kaj ĝiajn antaŭurbojn; 74 de la tribo
Aŝer: Maŝalon kaj ĝiajn antaŭurbojn, Abdonon kaj
ĝiajn antaŭurbojn, 75 Ĥukokon kaj ĝiajn antaŭurbojn,
kaj Reĥobon kaj ĝiajn antaŭurbojn; 76 de la tribo
Naftali: Kedeŝon en Galileo kaj ĝiajn antaŭurbojn,
Ĥamonon kaj ĝiajn antaŭurbojn, kaj Kirjataimon kaj
ĝiajn antaŭurbojn. 77 Al la ceteraj idoj de Merari
oni donis de la tribo Zebulun: Rimonon kaj ĝiajn
antaŭurbojn, kaj Taboron kaj ĝiajn antaŭurbojn; 78 kaj
transe de Jordan, kontraŭ Jeriĥo, oriente de Jordan,
oni donis de la tribo Ruben: Beceron en la dezerto kaj
ĝiajn antaŭurbojn, Jahacon kaj ĝiajn antaŭurbojn, 79
Kedemoton kaj ĝiajn antaŭurbojn, kaj Mefaaton kaj
ĝiajn antaŭurbojn; 80 kaj de la tribo Gad: Ramoton en
Gilead kaj ĝiajn antaŭurbojn, Maĥanaimon kaj ĝiajn
antaŭurbojn, 81 Ĥeŝbonon kaj ĝiajn antaŭurbojn, kaj
Jazeron kaj ĝiajn antaŭurbojn.

**7** La filoj de Isaĥar estis: Tola, Pua, Jaŝub, kaj Ŝimron
— kvar. 2 La idoj de Tola: Uzi, Refaja, Jeriel, Jaĥmaj,
Jibsam, kaj Ŝemuel, ĉefoj de patrodomoj de Tola,
kuraĝaj militistoj en siaj generacioj; ilia nombro en la

tempo de David estis dudek du mil sescent. 3 La idoj
de Uzi: Jizraĥja; la idoj de Jizraĥja: Miĥael, Obadja,
Joel, kaj Jiŝija — kune kvin patrodomoj. 4 Kun ili, laŭ
iliaj generacioj, laŭ iliaj patrodomoj, estis da militistoj
armitaj por milito tridek ses mil; ĉar ili havis multe
da edzinoj kaj infanoj. 5 Da iliaj fratoj, en ĉiuj familioj
de Isaĥar, estis okdek sep mil batalkapabluloj, ĉiuj
enskribitaj en la genealogiajn listojn. 6 Ĉe Benjamen:
Bela, Beĥer, kaj Jediael — tri. 7 La idoj de Bela:
Ecbon, Uzi, Uziel, Jerimot, kaj Iri — kvin patrodomoj,
militkapablaj. En la genealogiaj listoj ili prezentis la
nombron de dudek du mil tridek kvar. 8 La idoj de
Beĥer: Zemira, Joaŝ, Eliezer, Eljoenaj, Omri, Jeremot,
Abija, Anatot, kaj Alemet; ĉiuj ili estis la filoj de Beĥer.
9 En la listoj, laŭ ilia genealogio, laŭ iliaj patrodomoj,
estis dudek mil ducent batalkapabluloj. 10 La idoj de
Jediael: Bilhan; la idoj de Bilhan: Jeuŝ, Benjamen, Ehud,
Kenaana, Zetan, Tarŝiŝ, kaj Aĥiŝaĥar. 11 Ĉiuj ili estis
la idoj de Jediael, laŭ patrodomoj, batalkapabluloj,
dek sep mil ducent armitaj por milito. 12 Ŝupim kaj
Ĥupim, idoj de Ir; Ĥuŝim, idoj de Aĥer. 13 La filoj de
Naftali: Jaĥciel, Guni, Jecer, kaj Ŝalum, filoj de Bilha. 14
La filoj de Manase: Asriel, kiun naskis lia kromvirino,
Sirianino; ŝi naskis ankaŭ Maĥiron, la patron de
Gilead. 15 Maĥir prenis edzinon el la domanaro de
Ĥupim kaj Ŝupim; la nomo de lia fratino estis Maaĥa.
La nomo de la dua estis Celofĥad. Celofĥad havis nur
filinojn. 16 Kaj Maaĥa, la edzino de Maĥir, naskis filon
kaj donis al li la nomon Pereŝ; la nomo de lia frato
estis Ŝereŝ; liaj filoj estis Ulam kaj Rekem. 17 La filo de
Ulam estis Bedan. Tio estas la filoj de Gilead, filo de
Maĥir, filo de Manase. 18 Lia fratino Moleĥet naskis
Iŝ-Hodon, Abiezeron, kaj Maĥlan. 19 La filoj de Ŝemida
estis: Aĥjan, Ŝeĥem, Likĥi, kaj Aniam. 20 La idoj de
Efraim: Ŝutelaĥ, kaj lia filo Bered, kaj lia filo Taĥat, kaj
lia filo Eleada, kaj lia filo Taĥat, 21 kaj lia filo Zabad,
kaj lia filo Ŝutelaĥ, kaj Ezer, kaj Elead. Kaj mortigis
ilin la loĝantoj de Gat, la indiĝenoj de la lando, kiam
ili iris, por forpreni iliajn brutojn. 22 Kaj ilia patro
Efraim funebris longan tempon, kaj liaj fratoj venis,
por konsoli lin. 23 Kaj li envenis al sia edzino, kaj ŝi
gravediĝis kaj naskis filon, kaj donis al li la nomon
Beria, ĉar malfeliĉo okazis en lia domo. 24 Lia filino
estis Ŝeera. Ŝi konstruis Bet-Ĥoronon, la malsupran
kaj la supran, kaj Uzen-Ŝeeran. 25 Kaj lia filo estis
Refaĥ, lia filo estis Reŝef, lia filo estis Telaĥ, lia filo
estis Taĥan, 26 lia filo estis Ladan, lia filo estis Amihud,
lia filo estis Eliŝama, 27 lia filo estis Nun, lia filo estis
Josuo. 28 Ilia posedaĵo kaj loĝloko estis Bet-El kaj ĝiaj
filinurboj, oriente Naaran, okcidente Gezer kun ĝiaj
filinurboj, kaj Ŝeĥem kun ĝiaj filinurboj, ĝis Aza kun
ĝiaj filinurboj; 29 ĉe la flanko de la Manaseidoj: Bet-
Ŝean kun ĝiaj filinurboj, Taanaĥ kun ĝiaj filinurboj,
Megido kun ĝiaj filinurboj, Dor kun ĝiaj filinurboj.
En tiuj lokoj loĝis la idoj de Jozef, filo de Izrael. 30
La filoj de Aŝer: Jimna, Jiŝva, Jiŝvi, Beria; ilia fratino
estis Seraĥ. 31 La filoj de Beria: Ĥeber, kaj Malkiel, kiu
estis la patro de Birzait. 32 Ĥeber naskigis Jafleton,
Ŝomeron, Ĥotamon, kaj Ŝuan, ilian fratinon. 33 La filoj
de Jaflet: Pasaĥ, Bimhal, kaj Aŝvat. Tio estas la filoj
de Jaflet. 34 La filoj de Ŝemer: Aĥi, Rohaga, Jeĥuba,
kaj Aram. 35 La filoj de lia frato Helem: Cofaĥ, Jimna,
Ŝeleŝ, kaj Amal. 36 La filoj de Cofaĥ: Suaĥ, Ĥarnefer,
Ŝual, Beri, Jimra, 37 Becer, Hod, Ŝama, Ŝilŝa, Jitran,
kaj Beera. 38 La filoj de Jeter: Jefune, Pispa, kaj Ara.
39 La filoj de Ula: Araĥ, Ĥaniel, kaj Ricja. 40 Ĉiuj ĉi
tiuj estis idoj de Aŝer, ĉefoj de patrodomoj, elektitaj,
kuraĝaj militistoj, ĉefaj estroj. Ili estis enskribitaj en
la genealogia listo, en la militistaro, por milito; ilia
nombro estis dudek ses mil viroj.

8 De Benjamen naskiĝis: Bela, lia unuenaskito, Aŝbel,
la dua, Aĥraĥ, la tria; 2 Noĥa estis la kvara, kaj
Rafa estis la kvina. 3 La filoj de Bela estis: Adar, Gera,
Abihud, 4 Abiŝua, Naaman, Aĥoaĥ, 5 Gera, Ŝefufan,
kaj Ĥuram. 6 Jen estas la filoj de Ehud, kiuj estis ĉefoj
de patrodomoj, kiuj loĝis en Geba kaj elmigris en
Manaĥaton: 7 Naaman, Aĥija, Gera; ĉi tiu elmigrigis
ilin, kaj li naskigis Uzan kaj Aĥiĥudon. 8 Ŝaĥaraim
naskigis sur la kampoj de Moab, post kiam li forigis
de si siajn edzinojn Ĥuŝim kaj Baara. 9 Li naskigis de
sia edzino Ĥodeŝ: Jobabon, Cibjan, Meŝan, Malkamon,
10 Jeucon, Ŝoĥjan, kaj Mirman. Tio estis liaj filoj, ĉefoj
de patrodomoj. 11 De Ĥuŝim li naskigis Abitubon
kaj Elpaalon. 12 La filoj de Elpaal: Eber, Miŝeam, kaj
Ŝemer; ĉi tiu konstruis Onon kaj Lodon kaj ĝiajn
filinurbojn; 13 kaj Beria, kaj Ŝema. Ili estis la ĉefoj
de patrodomoj de la loĝantoj de Ajalon; ili elpelis la
loĝantojn de Gat. 14 Aĥjo, Ŝaŝak, Jeremot, 15 Zebadja,
Arad, Eder, 16 Miĥael, Jiŝpa, kaj Joĥa estis la filoj de
Beria. 17 Zebadja, Meŝulam, Ĥizki, Ĥeber, 18 Jiŝmeraj,
Jizlia, kaj Jobab estis la filoj de Elpaal. 19 Jakim, Ziĥri,
Zabdi, 20 Elienaj, Ciltaj, Eliel, 21 Adaja, Beraja, kaj
Ŝimrat estis la filoj de Ŝimei. 22 Jiŝpan, Eber, Eliel, 23

Abdon, Ziĥri, Ĥanan, 24 Ĥananja, Elam, Antotija, 25
Jifdeja, kaj Penuel estis la filoj de Ŝaŝak. 26 Ŝamŝeraj,
Ŝeĥarja, Atalja, 27 Jaareŝja, Elija, kaj Ziĥri estis la filoj
de Jeroĥam. 28 Tio estis la ĉefoj de patrodomoj, ĉefoj
laŭ siaj generacioj; ili loĝis en Jerusalem. 29 En Gibeon
loĝis: la fondinto de Gibeon — la nomo de lia edzino
estis Maaĥa — 30 kaj lia unuenaskita filo Abdon, Cur,
Kiŝ, Baal, Nadab, 31 Gedor, Aĥjo, kaj Zeĥer. 32 Miklot
naskigis Ŝiman. Ankaŭ ili apud siaj fratoj enloĝiĝis
en Jerusalem kun siaj fratoj. 33 Ner naskigis Kiŝon,
Kiŝ naskigis Saulon, Saul naskigis Jonatanon, Malki-
Ŝuan, Abinadabon, kaj Eŝbaalon. 34 La filo de Jonatan
estis Merib-Baal, kaj Merib-Baal naskigis Miĥan. 35 La
filoj de Miĥa estis Piton, Meleĥ, Taarea, kaj Aĥaz. 36
Aĥaz naskigis Jehoadan; Jehoada naskigis Alemeton,
Azmaveton, kaj Zimrin; Zimri naskigis Mocan. 37 Moca
naskigis Binean; lia filo estis Rafa, lia filo estis Eleasa,
lia filo estis Acel. 38 Acel havis ses filojn; jen estas
iliaj nomoj: Azrikam, Boĥru, Iŝmael, Ŝearja, Obadja,
kaj Ĥanan. Ĉiuj ĉi tiuj estis la filoj de Acel. 39 La filoj
de lia frato Eŝek: lia unuenaskito estis Ulam, la dua
estis Jeuŝ, kaj la tria estis Elifelet. 40 La filoj de Ulam
estis kuraĝaj militistoj, pafarkistoj, kaj ili havis multe
da filoj kaj nepoj: cent kvindek. Ĉiuj ĉi tiuj estis el la
Benjamenidoj.

9 Ĉiuj Izraelidoj estis kalkulitaj, kaj ili estis enskribitaj
en la libro de la reĝoj de Izrael. La Judojn oni
forkondukis en Babelon pro iliaj malbonagoj. 2 La
unuaj loĝantoj, kiuj loĝis en siaj posedaĵoj, en siaj
urboj, estis Izraelidoj, pastroj, Levidoj, kaj Netinoj.
3 En Jerusalem loĝis parto de la idoj de Jehuda, de
la idoj de Benjamen, kaj de la idoj de Efraim kaj de
Manase: 4 Utaj, filo de Amihud, filo de Omri, filo de
Imri, filo de Bani, el la idoj de Perec, filo de Jehuda; 5
kaj el la Ŝiloanoj: Asaja, la unuenaskito, kaj liaj filoj;
6 el la idoj de Zeraĥ: Jeuel, kaj iliaj fratoj, sescent
naŭdek; 7 el la Benjamenidoj: Salu, filo de Meŝulam,
filo de Hodavja, filo de Hasenua, 8 kaj Jibneja, filo de
Jeroĥam, Ela, filo de Uzi, filo de Miĥri, kaj Meŝulam,
filo de Ŝefatja, filo de Reuel, filo de Jibnija; 9 kaj iliaj
fratoj laŭ sia deveno, naŭcent kvindek ses. Ĉiuj ĉi tiuj
estis ĉefoj de patrodomoj en siaj patrodomoj. 10 Kaj el
la pastroj: Jedaja, Jehojarib, Jaĥin; 11 Azarja, filo de
Ĥilkija, filo de Meŝulam, filo de Cadok, filo de Merajot,
filo de Aĥitub, estro en la domo de Dio; 12 kaj Adaja,
filo de Jeroĥam, filo de Paŝĥur, filo de Malkija, kaj
Maasaj, filo de Adiel, filo de Jaĥzera, filo de Meŝulam,
filo de Meŝilemit, filo de Imer; 13 kaj iliaj fratoj, ĉefoj
de siaj patrodomoj, mil sepcent sesdek, tre lertaj en
la laboro de la servado en la domo de Dio. 14 El la
Levidoj: Ŝemaja, filo de Ĥaŝub, filo de Azrikam, filo de
Ĥaŝabja, el la idoj de Merari; 15 kaj Bakbakar, Ĥereŝ,
Galal, Matanja, filo de Miĥa, filo de Ziĥri, filo de Asaf,
16 Obadja, filo de Ŝemaja, filo de Galal, filo de Jedutun,
Bereĥja, filo de Asa, filo de Elkana, kiu loĝis en la
vilaĝoj de la Netofaanoj. 17 Kaj la pordegistoj: Ŝalum,
Akub, Talmon, Aĥiman, kaj iliaj fratoj; Ŝalum estis la
ĉefo. 18 Kaj ĝis nun ĉe la reĝa pordego, oriente, ili
estas pordegistoj el la anaro de la Levidoj. 19 Ŝalum,
filo de Kore, filo de Ebjasaf, filo de Koraĥ, kaj liaj
fratoj el lia patrodomo, la Koraĥidoj, laŭ sia ofico
estis gardistoj de la sojloj de la tabernaklo, kiel iliaj
patroj ĉe la restejo de la Eternulo estis gardistoj de la
eniro. 20 Pineĥas, filo de Eleazar, en la antaŭa tempo
estis ilia estro, kaj la Eternulo estis kun li. 21 Zeĥarja,
filo de Meŝelemja, estis pordisto ĉe la tabernaklo
de kunveno. 22 La tuta nombro de tiuj, kiuj estis
elektitaj kiel pordegistoj ĉe la sojloj, estis ducent dek
du. Ili estis enregistritaj laŭ siaj vilaĝoj. Ilin starigis
David, kaj Samuel, la antaŭvidisto, pro ilia fideleco.
23 Ili kaj iliaj filoj estis gardistoj de la pordegoj en
la domo de la Eternulo, la domo de la tabernaklo,
laŭ deĵoroj. 24 Ĉe la kvar flankoj estis la pordegistoj:
oriente, okcidente, norde, kaj sude. 25 Iliaj fratoj estis
en siaj vilaĝoj, kaj ili devis nur de tempo al tempo,
unu fojon en sep tagoj, veni al ili. 26 Ĉar konstante
estis kvar estroj de pordegistoj, ili estis Levidoj; ili
estis super la ĉambroj kaj super la trezoroj en la domo
de Dio. 27 Ili noktadis ĉirkaŭ la domo de Dio, ĉar ili
havis la devon gardi, kaj ili devis malfermi ĉiumatene.
28 Parto el ili estis super ĉiuj vazoj de la servado,
laŭkalkule ili enportadis kaj laŭkalkule elportadis. 29
Parto el ili estis komisiita pri la ceteraj vazoj kaj pri
ĉiuj sanktaj objektoj, pri la faruno, la vino, la oleo,
la olibano, kaj la aromaĵoj. 30 El la pastridoj kelkaj
pretigadis la ŝmiraĵojn el aromaĵoj. 31 Al Matitja el la
Levidoj, kiu estis unuenaskito de Ŝalum, Koraĥido,
estis komisiitaj la aferoj de la patoj. 32 Al parto de
la Kehatidoj, iliaj fratoj, estis komisiitaj la panoj de
propono, kiujn ili devis pretigi por ĉiu sabato. 33 La
kantistoj, ĉefoj de patrodomoj inter la Levidoj, estis
liberaj de servado en la ĉambroj, ĉar tage kaj nokte ili
devis sin okupadi per sia arto. 34 Tio estas la ĉefoj de

patrodomoj de la Levidoj en siaj generacioj. Ili loĝis
en Jerusalem. **35** En Gibeon loĝis: Jeiel, la fondinto
de Gibeon — la nomo de lia edzino estis Maaĥa — **36**
kaj lia unuenaskita filo Abdon, kaj Cur, Kiŝ, Baal, Ner,
Nadab, **37** Gedor, Aĥjo, Zeĥarja, kaj Miklot. **38** Miklot
naskigis Ŝimamon. Ili ankaŭ apud siaj fratoj enloĝiĝis
en Jerusalem kun siaj fratoj. **39** Ner naskigis Kiŝon,
Kiŝ naskigis Saulon, Saul naskigis Jonatanon, Malki-
Ŝuan, Abinadabon, kaj Eŝbaalon. **40** La filo de Jonatan
estis Merib-Baal, kaj Merib-Baal naskigis Miĥan. **41** La
filoj de Miĥa estis: Piton, Meleĥ, kaj Taĥrea, **42** kaj
Aĥaz — li naskigis Jaaran, Jaara naskigis Alemeton,
Azmaveton, kaj Zimrin; Zimri naskigis Mocan; **43**
Moca naskigis Binean; lia filo estis Refaja, lia filo
estis Eleasa, lia filo estis Acel. **44** Acel havis ses filojn;
jen estas iliaj nomoj: Azrikam, Boĥru, Iŝmael, Ŝearja,
Obadja, kaj Ĥanan. Tio estis la filoj de Acel.

**10** Dume la Filiŝtoj batalis kontraŭ Izrael; kaj la
Izraelidoj forkuris de la Filiŝtoj, kaj falis mortigitaj
sur la monto Gilboa. **2** Kaj la Filiŝtoj kuratingis Saulon
kaj liajn filojn; kaj la Filiŝtoj mortigis Jonatanon kaj
Abinadabon kaj Malki-Ŝuan, filojn de Saul. **3** La batalo
fortiĝis kontraŭ Saul; kaj la arkpafistoj trovis lin, kaj
li estis vundita de la arkpafistoj. **4** Tiam Saul diris
al sia armilportisto: Eltiru vian glavon, kaj trapiku
min per ĝi, por ke ne venu tiuj necirkumciditoj kaj ne
mokmalhonoru min. Sed lia armilportisto ne volis, ĉar
li forte timis. Tiam Saul prenis sian glavon kaj faligis
sin sur ĝin. **5** Kiam lia armilportisto vidis, ke Saul
mortis, li ankaŭ faligis sin sur la glavon kaj mortis. **6**
Tiamaniere mortis Saul kaj liaj tri filoj, kaj lia tuta
domo kune mortis. **7** Kiam ĉiuj Izraelidoj, kiuj estis en
la valo, vidis, ke oni forkuras kaj ke Saul kaj liaj filoj
mortis, tiam ili forlasis siajn urbojn kaj forkuris; kaj
venis la Filiŝtoj kaj enloĝiĝis en ili. **8** En la sekvanta
tago venis la Filiŝtoj, por senvestigi la mortigitojn,
kaj ili trovis Saulon kaj liajn filojn falintajn sur la
monto Gilboa. **9** Kaj ili senvestigis lin kaj prenis lian
kapon kaj liajn armilojn kaj sendis en la landon de
la Filiŝtoj ĉirkaŭen, por anonci al iliaj idoloj kaj al la
popolo. **10** Kaj ili metis liajn armilojn en la domon
de siaj dioj, kaj lian kranion ili alfiksis en la domo
de Dagon. **11** Kiam la tuta Jabeŝ en Gilead aŭdis pri
ĉio, kion faris la Filiŝtoj al Saul, **12** tiam leviĝis ĉiuj
kuraĝuloj, kaj prenis la korpon de Saul kaj la korpojn
de liaj filoj kaj alportis lin en Jabeŝon, kaj enterigis
iliajn ostojn sub la kverko en Jabeŝ, kaj fastis dum sep
tagoj. **13** Tiamaniere mortis Saul pro siaj malbonagoj,
kiujn li faris antaŭ la Eternulo, ne plenumante la
vorton de la Eternulo; ankaŭ pro tio, ke li turnis sin al
antaŭdiristino, por demandi, **14** sed ne demandis la
Eternulon. Pro tio Li mortigis lin, kaj transdonis la
reĝadon al David, filo de Jiŝaj.

**11** Kaj kunvenis ĉiuj Izraelidoj al David en Ĥebronon,
kaj diris: Jen ni estas via osto kaj via karno. **2**
Ankaŭ hieraŭ kaj antaŭhieraŭ, kiam Saul estis ankoraŭ
reĝo, vi elkondukadis kaj enkondukadis Izraelon; kaj
la Eternulo, via Dio, diris al vi: Vi paŝtos Mian popolon
Izrael, kaj vi estos estro de Mia popolo Izrael. **3** Kaj
ĉiuj plejaĝuloj de Izrael venis al la reĝo en Ĥebronon,
kaj David faris kun ili interligon en Ĥebron antaŭ la
Eternulo; kaj ili sanktoleis Davidon reĝo super Izrael,
konforme al la vorto de la Eternulo per Samuel. **4** Kaj
David kaj ĉiuj Izraelidoj iris en Jerusalemon (tio estas,
en Jebuson). Tie la Jebusidoj estis la loĝantoj de la
lando. **5** Kaj la loĝantoj de Jebus diris al David: Vi ne
eniros ĉi tien. Sed David venkoprenis la fortikaĵon
Cion, tio estas, la urbon de David. **6** Kaj David diris:
Kiu la unua venkobatos la Jebusidojn, tiu estos ĉefo
kaj estro. Kaj la unua supreniris Joab, filo de Ceruja,
kaj li fariĝis ĉefo. **7** Kaj David ekloĝis en tiu fortikaĵo;
pro tio oni donis al ĝi la nomon: Urbo de David. **8** Kaj
li ĉirkaŭkonstruis la urbon ĉiuflanke, de Milo en la
tuta ĉirkaŭo; kaj Joab restarigis la ceterajn partojn de
la urbo. **9** Kaj David fariĝadis ĉiam pli kaj pli granda,
kaj la Eternulo Cebaot estis kun li. **10** Jen estas la
ĉefaj herooj, kiuj estis ĉe David, kaj kiuj tenis sin
forte kun li dum lia reĝado, kune kun la tuta Izrael,
por reĝigi lin super Izrael konforme al la vorto de la
Eternulo. **11** Jen estas la nombro de la herooj, kiuj
estis ĉe David: Jaŝobeam, filo de Ĥaĥmoni, estro de la
tridek; li levis sian lancon kontraŭ tricent kaj mortigis
ilin per unu fojo. **12** Post li estis Eleazar, filo de Dodo,
la Aĥoĥido; li estis el la tri herooj. **13** Li estis kun
David en Pas-Damim, kie la Filiŝtoj kolektiĝis por
batalo; tie estis kampoparto plena de hordeo; kaj la
popolo forkuris antaŭ la Filiŝtoj. **14** Sed tiuj stariĝis
meze de la kampoparto, kaj savis ĝin kaj venkobatis la
Filiŝtojn; kaj la Eternulo helpis per granda helpo. **15**
Kaj tri el la tridek ĉefoj iris sur la rokon al David, en la
kavernon Adulam, dum la tendaro de la Filiŝtoj staris
en la valo Refaim. **16** David tiam estis en la fortikaĵo,

kaj la garnizono de la Filiŝtoj estis tiam en Bet-Leĥem.
17 Kaj David esprimis deziron kaj diris: Kiu trinkigus
al mi akvon el la puto Bet-Leĥema, kiu estas apud
la pordego? 18 Tiam tiuj tri trarompe penetris en la
tendaron de la Filiŝtoj, ĉerpis akvon el la puto Bet-
Leĥema, kiu estis apud la pordego, prenis kaj alportis
al David. Sed David ne volis trinki ĝin; li elverŝis ĝin
al la Eternulo, 19 kaj diris: Gardu min mia Dio, ke
mi ne faru tion: ĉu mi trinku la sangon de tiuj viroj,
kiuj riskis sian vivon? ĉar kun risko por sia vivo ili
alportis ĝin. Kaj li ne volis trinki ĝin. Tion faris la
tri herooj. 20 Abiŝaj, frato de Joab, estis estro de tiuj
tri; li mortigis per sia lanco tricent homojn, kaj li
havis gloran nomon inter la tri. 21 El la tri li estis
honorata de du kaj estis ilia estro, sed en la trion li
ne eniris. 22 Benaja, filo de Jehojada, filo de homo
kuraĝa, granda pro siaj faroj, el Kabceel: li mortigis
la du fortulojn de Moab; li ankaŭ malsupreniris, kaj
mortigis leonon en kavo en neĝa tago. 23 Li ankaŭ
mortigis Egipton, viron, kiu havis la alton de kvin
ulnoj; en la mano de la Egipto estis lanco kiel rultrabo
de teksisto; li aliris al li kun bastono, elŝiris la lancon
el la mano de la Egipto, kaj mortigis lin per lia propra
lanco. 24 Tion faris Benaja, filo de Jehojada. Kaj li
havis gloran nomon inter la tri herooj. 25 Inter la
tridek li estis plej honorata, sed en la trion li ne
eniris. Kaj David faris lin lia korpogardistestro. 26 La
ĉefaj militistoj estis: Asahel, frato de Joab, Elĥanan,
filo de Dodo, el Bet-Leĥem, 27 Ŝamot, la Harorano,
Ĥelec, la Pelonano, 28 Ira, filo de Ikeŝ, la Tekoaano,
Abiezer, la Anatotano, 29 Sibĥaj, la Ĥuŝaido, Ilaj, la
Aĥoĥido, 30 Maharaj, la Netofaano, Ĥeled, filo de
Baana, la Netofaano, 31 Itaj, filo de Ribaj, el Gibea
de la Benjamenidoj, Benaja, la Piratonano, 32 Ĥuraj,
el Naĥale-Gaaŝ, Abiel, la Arbatano, 33 Azmavet, la
Baĥurimano, Eljaĥba, la Ŝaalbonano; 34 el la filoj de
Haŝem, la Gizonano: Jonatan, filo de Ŝage, la Hararano,
35 Aĥiam, filo de Saĥar, la Hararano, Elifal, filo de
Ur, 36 Ĥefer, la Meĥeratano, Aĥija, la Pelonano, 37
Ĥecro, la Karmelano, Naaraj, filo de Ezbaj, 38 Joel,
frato de Natan, Mibĥar, filo de Hagri, 39 Celek, la
Amonido, Naĥaraj, la Beerotano, armilportisto de
Joab, filo de Ceruja, 40 Ira, la Jetrido, Gareb, la Jetrido,
41 Urija, la Ĥetido, Zabad, filo de Aĥlaj, 42 Adina, filo
de Ŝiza, la Rubenido, ĉefo de Rubenidoj, kaj kun li estis
tridek, 43 Ĥanan, filo de Maaĥa, Joŝafat, la Mitnido, 44
Uzija, la Aŝterotano, Ŝama kaj Jeiel, filoj de Ĥotam, la
Aroerano, 45 Jediael, filo de Ŝimri, kaj lia frato Joĥa,
la Ticano, 46 Eliel, la Maĥavido, Jeribaj kaj Joŝavja,
filoj de Elnaam, Jitma, la Moabido, 47 Eliel, Obed, kaj
Jaasiel el Mecobaja.

12 Jen estas tiuj, kiuj venis al David en Ciklagon,
kiam li estis ankoraŭ kaŝita antaŭ Saul, filo de
Kiŝ; ili ankaŭ estis inter la herooj, helpantoj en la
milito; 2 armitaj per pafarko, povosciantaj ĵeti ŝtonojn
kaj pafarkajn sagojn per la dekstra mano kaj per la
maldekstra, el la fratoj de Saul, Benjamenidoj: 3 la
ĉefo Aĥiezer, kaj Joaŝ, filoj de Ŝemaa, la Gibeaano,
Jeziel kaj Pelet, filoj de Azmavet, Beraĥa, kaj Jehu, la
Anatotano, 4 Jiŝmaja, la Gibeonano, heroo el tridek kaj
super tridek, Jeremia, Jaĥaziel, Joĥanan, kaj Jozabad,
la Gederaano, 5 Eluzaj, Jerimot, Bealja, Ŝemarja, kaj
Ŝefatja, la Ĥarufano, 6 Elkana, Jiŝija, Azarel, Joezer, kaj
Jaŝobeam, la Koraĥidoj, 7 Joela kaj Zebadja, filoj de
Jeroĥam, el Gedor. 8 El la Gadidoj apartiĝis al David en
la fortikigitan lokon en la dezerto kuraĝaj militistoj,
kapablaj batalistoj, armitaj per ŝildo kaj lanco; iliaj
vizaĝoj estis kiel vizaĝo de leono, kaj rapidkuraj ili
estis, kiel gazeloj sur la montoj: 9 Ezer estis la ĉefo,
Obadja la dua, Eliab la tria, 10 Miŝmana la kvara,
Jeremia la kvina, 11 Ataj la sesa, Eliel la sepa, 12
Joĥanan la oka, Elzabad la naŭa, 13 Jeremia la deka,
Maĥbanaj la dek-unua. 14 Ĉi tiuj el la Gadidoj estis
ĉefoj en la militistaro: la plej malgranda estis super
cent, kaj la plej granda super mil. 15 Ili estis tiuj, kiuj
transiris Jordanon en la unua monato, kiam ĝi inundis
siajn ambaŭ bordojn, kaj ili dispelis ĉiujn loĝantojn de
la valoj orienten kaj okcidenten. 16 Ankaŭ el la idoj de
Benjamen kaj de Jehuda oni venis en la fortikigitan
lokon al David. 17 Kaj David eliris renkonte al ili, kaj
ekparolis kaj diris al ili: Se vi venis al mi kun paco,
por helpi al mi, mia koro estos kun vi; sed se por
ruze transdoni min al miaj malamikoj, kvankam miaj
manoj estas senkulpaj, tiam vidu tion Dio de niaj
patroj, kaj Li juĝu. 18 Kaj spirito venis sur Amasajon,
la estron de la herooj, kaj li diris: Al vi, ho David,
kaj kun vi, ho filo de Jiŝaj, estu paco; paco al vi, kaj
paco al viaj helpantoj, ĉar al vi helpas via Dio. Kaj
David ilin akceptis kaj faris ilin ĉefoj de la militistoj.
19 Ankaŭ el la Manaseidoj oni aliĝis al David, kiam
li iris kun la Filiŝtoj milite kontraŭ Saulon, sed ne
helpis al ili; ĉar post konsiliĝo la estroj de la Filiŝtoj
forsendis lin, dirante: Kun niaj kapoj li aliĝos al sia

sinjoro Saul. 20 Kiam li venis en Ciklagon, aliĝis al
li el la Manaseidoj: Adnaĥ, Jozabad, Jediael, Miĥael,
Jozabad, Elihu, kaj Ciltaj, milestroj de la Manaseidoj.
21 Kaj ili helpis al David kontraŭ la militistoj, ĉar ili
ĉiuj estis herooj, kaj ili estis estroj en militistaro.
22 Ĉiutage oni venis pli al David, por helpi al li, ĝis
kolektiĝis granda armeo, kiel armeo de Dio. 23 Jen
estas la nombro de la ĉefaj armitaj militistoj, kiuj venis
al David en Ĥebronon, por transdoni al li la regnon
de Saul, konforme al la vorto de la Eternulo: 24 da
Jehudaidoj, portantaj ŝildon kaj lancon, estis ses mil
okcent armitaj por la militistaro; 25 el la Simeonidoj,
batalkapablaj por la militistaro, estis sep mil cent; 26 el
la Levidoj estis kvar mil sescent; 27 kaj Jehojada, estro
de Aaronidoj, kaj kun li tri mil sepcent; 28 kaj Cadok,
kuraĝa junulo, kaj lia patrodomo, dudek du estroj; 29
el la Benjamenidoj, samtribanoj de Saul, tri mil; ĝis
tiam la plimulto el ili fidele servis al la domo de Saul;
30 el la Efraimidoj dudek mil okcent kuraĝaj militistoj,
viroj famaj en siaj patrodomoj; 31 el la duontribo de
Manase dek ok mil, kiuj estis vokitaj laŭnome, por iri
reĝigi Davidon; 32 el la Isaĥaridoj, kiuj komprenis la
cirkonstancojn, kaj sciis, kion Izrael devas fari, estis
ducent ĉefoj, kaj ĉiuj iliaj fratoj agis laŭ iliaj vortoj; 33
el la Zebulunidoj, militkapablaj, kaj irantaj en militon
kun ĉiaj bataliloj, estis kvindek mil, por enviciĝi en
konkordo; 34 el la Naftaliidoj estis mil estroj, kaj kun
ili tridek sep mil kun ŝildoj kaj lancoj; 35 el la Danidoj,
armitaj por milito, estis dudek ok mil sescent; 36 el la
Aŝeridoj, militkapablaj kaj pretaj por milito, kvardek
mil; 37 de trans Jordan, el la Rubenidoj, la Gadidoj,
kaj la duontribo de Manase, kun ĉiaj militaj bataliloj,
cent dudek mil. 38 Ĉiuj tiuj militistoj, prezentantaj
aranĝitajn vicojn, venis plenkore en Ĥebronon, por
fari Davidon reĝo super la tuta Izrael; ankaŭ ĉiuj
ceteraj Izraelidoj estis unuanimaj, por reĝigi Davidon.
39 Kaj ili restis tie kun David dum tri tagoj, manĝis kaj
trinkis; ĉar iliaj fratoj pretigis por ili; 40 ankaŭ tiuj, kiuj
estis proksime de ili, ĝis Isaĥar, Zebulun, kaj Naftali,
alportadis al ili sur azenoj, kameloj, muloj, kaj bovoj
manĝaĵon el faruno, premitajn figojn, sekvinberojn,
vinon, oleon, bovojn, kaj ŝafojn en granda kvanto; ĉar
estis ĝojo en Izrael.

13 David konsiliĝis kun la milestroj, centestroj, kaj
ĉiuj ĉefoj; 2 kaj David diris al la tuta komunumo
de Izrael: Se plaĉas al vi, kaj se tio estas de la Eternulo,
nia Dio, ni dissendu ĉiuflanken al ĉiuj ceteraj niaj
fratoj en ĉiujn regionojn de Izrael, kaj samtempe al la
pastroj kaj Levidoj en la urbojn de ilia loĝado, ke ili
kolektiĝu al ni; 3 kaj ni transportu al ni la keston de
nia Dio, ĉar ni ne turnis nin al Li en la tempo de Saul.
4 Kaj la tuta komunumo diris, ke oni tiel agu; ĉar la
afero plaĉis al la tuta popolo. 5 Tiam David kolektis
la tutan Izraelon, de Ŝiĥor la Egipta ĝis Ĥamat, por
ke oni venigu la keston de Dio el Kirjat-Jearim. 6
Kaj David kun la tuta Izrael iris en Baalan, en Kirjat-
Jearimon, kiu troviĝas en Judujo, por venigi de tie la
keston de Dio, de la Eternulo, kiu sidas sur la keruboj,
kie estas vokata Lia nomo. 7 Kaj oni veturigis la keston
de Dio sur nova veturilo el la domo de Abinadab, kaj
Uza kaj Aĥjo kondukis la veturilon. 8 Kaj David kaj
ĉiuj Izraelidoj ludis antaŭ Dio per la tuta forto, kun
kantoj, harpoj, psalteroj, tamburinoj, cimbaloj, kaj
trumpetoj. 9 Kiam ili alvenis al la draŝejo de Kidon,
Uza etendis sian manon, por subteni la keston, ĉar
la bovoj klinpuŝis ĝin. 10 Tiam ekflamis la kolero de
la Eternulo kontraŭ Uza, kaj Li mortigis lin pro tio,
ke li etendis sian manon al la kesto; kaj li mortis tie
antaŭ Dio. 11 Kaj afliktiĝis David pro tio, ke la Eternulo
frapis Uzan, kaj li donis al tiu loko la nomon Perec-
Uza, ĝis la nuna tago. 12 Kaj David ektimis Dion en
tiu tago, kaj diris: Kiamaniere mi enportos al mi la
keston de Dio? 13 Kaj David ne transportigis la keston
al si, en la urbon de David, sed li direktis ĝin en la
domon de Obed-Edom, la Gatano. 14 Kaj la kesto de
Dio restis kun la familio de Obed-Edom en lia domo
dum tri monatoj; kaj la Eternulo benis la domon de
Obed-Edom, kaj ĉion, kio apartenis al li.

14 Ĥiram, reĝo de Tiro, sendis al David senditojn, kaj
cedran lignon, kaj masonistojn kaj ĉarpentistojn,
por ke ili konstruu por li domon. 2 Kaj David konsciis,
ke la Eternulo fortikigis lin kiel reĝon super Izrael,
ke lia regno leviĝis alte pro Lia popolo Izrael. 3 Kaj
David prenis ankoraŭ edzinojn en Jerusalem, kaj David
naskigis ankoraŭ filojn kaj filinojn. 4 Kaj jen estas la
nomoj de tiuj, kiuj naskiĝis al li en Jerusalem: Ŝamua
kaj Ŝobab, Natan kaj Salomono 5 kaj Jibĥar kaj Eliŝua
kaj Elpelet 6 kaj Noga kaj Nefeg kaj Jafia 7 kaj Eliŝama
kaj Beeljada kaj Elifelet. 8 Kiam la Filiŝtoj aŭdis, ke
David estas oleita kiel reĝo super la tuta Izrael, tiam
ĉiuj Filiŝtoj iris, por serĉi Davidon. David aŭdis pri
tio, kaj li eliris kontraŭ ilin. 9 Kaj la Filiŝtoj venis

kaj okupis la valon Refaim. 10 Kaj David demandis
Dion, dirante: Ĉu mi iru kontraŭ la Filiŝtojn? kaj ĉu Vi
transdonos ilin en mian manon? Kaj la Eternulo diris
al li: Iru, ĉar Mi transdonos ilin en vian manon. 11 Kaj
ili iris al Baal-Peracim, kaj David venkobatis ilin tie.
Kaj David diris: Dio disbatis miajn malamikojn per mia
mano, kiel oni disbatas akvon. Tial oni donis al tiu
loko la nomon Baal-Peracim. 12 Kaj ili lasis tie siajn
diojn; kaj David ordonis, ke oni forbruligu ilin per
fajro. 13 Kaj denove venis la Filiŝtoj kaj okupis la valon.
14 Tiam David denove demandis Dion, kaj Dio diris al
li: Ne iru post ili, deturnu vin de ili, kaj venu al ili de
la flanko de la morusarboj; 15 kaj kiam vi ekaŭdos la
sonon de paŝoj sur la supro de la morusarboj, tiam
komencu la batalon; ĉar Dio eliris antaŭ vi, por frapi la
tendaron de la Filiŝtoj. 16 Kaj David faris, kiel ordonis
al li Dio; kaj ili venkobatis la tendaron de la Filiŝtoj de
Gibeon ĝis Gezer. 17 Kaj la nomo de David fariĝis fama
en ĉiuj landoj; kaj la Eternulo faris lin timata de ĉiuj
nacioj.

**15** Li konstruis al si domojn en la urbo de David,
kaj pretigis lokon por la kesto de Dio, kaj etendis
tendon super ĝi. 2 Tiam David diris: Neniu portu la
keston de Dio krom la Levidoj; ĉar ilin la Eternulo
elektis, por ke ili portu la keston de Dio kaj servu al
Li eterne. 3 Kaj David kunvenigis ĉiujn Izraelidojn
en Jerusalemon, por porti la keston de la Eternulo
sur ĝian lokon, kiun li pretigis por ĝi. 4 Kaj David
kunvenigis la idojn de Aaron kaj la Levidojn: 5 el la
idoj de Kehat estis: la estro Uriel kaj liaj fratoj, cent
dudek; 6 el la idoj de Merari: la estro Asaja kaj liaj
fratoj, ducent dudek; 7 el la idoj de Gerŝon: la estro
Joel kaj liaj fratoj, cent tridek; 8 el la idoj de Elicafan:
la estro Ŝemaja kaj liaj fratoj, ducent; 9 el la idoj de
Ĥebron: la estro Eliel kaj liaj fratoj, okdek; 10 el la idoj
de Uziel: la estro Aminadab kaj liaj fratoj, cent dek du.
11 Kaj David alvokis la pastrojn Cadok kaj Ebjatar, kaj la
Levidojn Uriel, Asaja, Joel, Ŝemaja, Eliel, kaj Aminadab;
12 kaj li diris al ili: Vi, ĉefoj de patrodomoj de la
Levidoj, sanktigu vin kaj viajn fratojn, kaj alportu la
keston de la Eternulo, Dio de Izrael, sur la lokon, kiun
mi pretigis por ĝi; 13 ĉar antaŭe, kiam ne vi tion faris,
la Eternulo, nia Dio, frapis nin pro tio, ke ni serĉis Lin
ne tiel, kiel oni devas. 14 Kaj sanktigis sin la pastroj
kaj la Levidoj, por porti la keston de la Eternulo, Dio
de Izrael. 15 Kaj la idoj de Levi ekportis la keston de
Dio, kiel ordonis Moseo laŭ la vorto de la Eternulo,
sur siaj ŝultroj, per stangoj sur ili. 16 Kaj David diris
al la estroj de la Levidoj, ke ili starigu siajn fratojn
la kantistojn kun muzikaj instrumentoj, psalteroj,
harpoj, kaj laŭtaj cimbaloj, por ke alte aŭdiĝu la sonoj
de ĝojo. 17 Kaj la Levidoj starigis Hemanon, filon
de Joel, kaj el liaj fratoj Asafon, filon de Bereĥja,
kaj el la idoj de Merari, siaj fratoj, Etanon, filon de
Kuŝaja; 18 kaj kun ili iliajn duagradajn fratojn: Zeĥarja,
Ben, Jaaziel, Ŝemiramot, Jeĥiel, Uni, Eliab, Benaja,
Maaseja, Matitja, Eliflehu, Mikneja, Obed-Edom, kaj
Jeiel, kiel pordegistojn. 19 La kantistoj Heman, Asaf,
kaj Etan estis por ludado sur kupraj cimbaloj; 20
Zeĥarja, Aziel, Ŝemiramot, Jeĥiel, Uni, Eliab, Maaseja,
kaj Benaja — sur psalteroj, por sopranuloj; 21 Matitja,
Eliflehu, Mikneja, Obed-Edom, Jeiel, kaj Azazja — sur
harpoj, por basuloj, por antaŭkanti; 22 Kenanja, la
estro de la Levidoj — por aranĝado; li aranĝadis la
muzikon, ĉar li estis kompetentulo. 23 Bereĥja kaj
Elkana estis pordogardistoj ĉe la kesto; 24 Ŝebanja,
Joŝafat, Netanel, Amasaj, Zeĥarja, Benaja, kaj Eliezer,
la pastroj, trumpetadis per trumpetoj antaŭ la kesto
de Dio; Obed-Edom kaj Jeĥija estis pordogardistoj ĉe
la kesto. 25 Tiamaniere iris David kaj la plejaĝuloj
de Izrael kaj la milestroj, por transporti kun ĝojo la
keston de interligo de la Eternulo el la domo de Obed-
Edom. 26 Kaj kiam Dio helpis al la Levidoj, kiuj portis
la keston de interligo de la Eternulo, oni oferbuĉis sep
bovojn kaj sep ŝafojn. 27 David estis vestita per tuniko
el delikata tolo, ankaŭ ĉiuj Levidoj, kiuj portis la
keston, la kantistoj, kaj Kenanja, la estro de aranĝado
de la ĥoroj; David ankaŭ havis sur si linan efodon. 28
Kaj ĉiuj Izraelidoj akompanis la keston de interligo de
la Eternulo, kun ĝojkrioj, kun sonado de korno, kun
trumpetoj, laŭtaj cimbaloj, psalteroj, kaj harpoj. 29
Kiam la kesto de interligo de la Eternulo venis al la
urbo de David, Miĥal, filino de Saul, rigardis tra la
fenestro; kaj kiam ŝi vidis, ke la reĝo David saltas kaj
ludas, ŝi ekmalestimis lin en sia koro.

**16** Kaj oni alportis la keston de Dio, kaj metis ĝin
interne de la tendo, kiun David starigis por ĝi;
kaj oni alportis bruloferojn kaj pacoferojn antaŭ Dion.
2 Kiam David finis la oferadon de la bruloferoj kaj
de la pacoferoj, li benis la popolon en la nomo de la
Eternulo. 3 Kaj li disdonis al ĉiuj Izraelidoj, kiel al la
viroj, tiel ankaŭ al la virinoj, al ĉiu po unu bulo da

pano, po unu porcio da viando, kaj po unu peniko
da sekvinberoj. 4 Kaj li starigis antaŭ la kesto de la
Eternulo el la Levidoj servantojn, por kantadi gloron,
dankon, kaj laŭdon al la Eternulo, Dio de Izrael: 5
la ĉefo estis Asaf, la dua estis Zeĥarja, poste Jeiel,
Ŝemiramot, Jeĥiel, Matitja, Eliab, Benaja, Obed-Edom,
kaj Jeiel, kun psalteroj kaj harpoj, kaj Asaf sonigadis
per cimbaloj; 6 Benaja kaj Jaĥaziel, la pastroj, estis
kun trumpetoj ĉiam antaŭ la kesto de interligo de
Dio. 7 Tiam, en tiu tago, David la unuan fojon aranĝis
dankokanton al la Eternulo per Asaf kaj liaj fratoj: 8
Gloru la Eternulon, voku Lian nomon; Sciigu inter
la popoloj Liajn farojn. 9 Kantu al Li, muziku al Li;
Parolu pri ĉiuj Liaj mirakloj. 10 Laŭdu Lian sanktan
nomon; Ĝoju la koro de tiuj, kiuj serĉas la Eternulon.
11 Turnu vin al la Eternulo kaj al Lia potenco; Serĉu
ĉiam Lian vizaĝon. 12 Memoru Liajn miraklojn, kiujn
Li faris; Liajn signomiraklojn kaj la juĝojn de Lia
buŝo; 13 Vi, semo de Izrael, Lia sklavo, Filoj de Jakob,
Liaj elektitoj. 14 Li estas la Eternulo, nia Dio; Sur la
tuta tero estas Liaj juĝoj. 15 Memoru eterne Lian
interligon, La vorton, kiun Li testamentis por mil
generacioj, 16 Kiun Li interkonsentis kun Abraham
Kaj ĵuris al Isaak. 17 Li metis ĝin por Jakob kiel leĝon,
Por Izrael kiel eternan interligon, 18 Dirante: Al vi Mi
donos la landon Kanaanan Kiel vian parton heredan.
19 Kiam vi estis malgrandnombraj, Malmultaj, kaj
fremduloj en ĝi, 20 Kaj ili iradis de popolo al popolo, El
unu regno al alia gento, 21 Tiam Li al neniu permesis
premi ilin, Kaj Li punis pro ili reĝojn; 22 Dirante:
Ne tuŝu Miajn sanktoleitojn, Kaj al Miaj profetoj ne
faru malbonon. 23 Kantu al la Eternulo la tuta tero;
Proklamu de tago al tago Lian savon. 24 Rakontu
inter la popoloj Lian gloron, Inter ĉiuj gentoj Liajn
miraklojn. 25 Ĉar la Eternulo estas granda kaj tre
glorinda; Li estas timinda super ĉiuj dioj; 26 Ĉar ĉiuj
dioj de la popoloj estas idoloj; Sed la Eternulo kreis la
ĉielon. 27 Gloro kaj majesto estas antaŭ Li; Forto kaj
beleco estas sur Lia loko. 28 Tributu al la Eternulo,
familioj de la popoloj; Tributu al la Eternulo gloron
kaj potencon. 29 Tributu al la Eternulo honoron
de Lia nomo; Alportu donacon, kaj venu antaŭ Lin;
Adorkliniĝu antaŭ la Eternulo en sankta ornamo. 30
Tremu antaŭ Li la tuta tero; Li aranĝis ja la mondon,
ke ĝi ne ŝanceliĝu. 31 Ĝoju la ĉielo, kaj estu gaja la
tero; Kaj oni diru inter la nacioj: La Eternulo reĝas. 32
Bruu la maro, kaj ĉio, kio ĝin plenigas; Ĝoju la kampo,
kaj ĉio, kio estas sur ĝi. 33 Tiam kantu ĉiuj arboj de
la arbaro antaŭ la Eternulo, Ĉar Li venas, por juĝi la
teron. 34 Laŭdu la Eternulon, ĉar Li estas bona; Ĉar
eterna estas Lia favorkoreco. 35 Kaj diru: Savu nin,
ho Dio de nia savo, Kolektu nin kaj liberigu nin el
inter la nacioj, Por ke ni danku Vian sanktan nomon,
Por ke ni gloru nin per Via majesto. 36 Benata estu
la Eternulo, Dio de Izrael, De eterne ĝis eterne. Kaj
la tuta popolo diris: Amen! kaj gloro al la Eternulo!
37 Kaj li restigis tie antaŭ la kesto de interligo de la
Eternulo Asafon kaj liajn fratojn, por servadi antaŭ la
kesto konstante, laŭ la ordo de ĉiu tago; 38 kaj Obed-
Edomon kaj liajn fratojn, sesdek ok; Obed-Edom, filo
de Jedutun, kaj Ĥosa, restis kiel pordegistoj; 39 kaj la
pastron Cadok kaj liajn fratojn, la pastrojn, antaŭ la
loĝejo de la Eternulo sur la altaĵo en Gibeon, 40 por ke
ili alportadu bruloferojn al la Eternulo sur la altaro
de bruloferoj konstante, matene kaj vespere, kaj por
ĉio, kio estas skribita en la instruo de la Eternulo,
kiun Li donis al Izrael. 41 Kaj kun ili estis Heman
kaj Jedutun, kaj la aliaj elektitoj, difinitaj laŭnome,
por kantadi laŭdon al la Eternulo, ĉar eterna estas
Lia favorkoreco; 42 kun ili estis Heman kaj Jedutun,
kun trumpetoj kaj cimbaloj kaj aliaj instrumentoj por
kantado antaŭ Dio; kaj la filoj de Jedutun estis ĉe
la pordego. 43 Kaj la tuta popolo disiris ĉiu en sian
domon; kaj David iris returne, por beni sian domon.

**17** Kiam David loĝis en sia domo, li diris unu
fojon al la profeto Natan: Jen mi loĝas en domo
cedroligna, kaj la kesto de interligo de la Eternulo
restas sub tapiŝoj. 2 Kaj Natan diris al David: Ĉion,
kio estas sur via koro, faru, ĉar Dio estas kun vi. 3
Sed en tiu sama nokto aperis vorto de Dio al Natan,
dirante: 4 Iru, kaj diru al Mia servanto David: Tiele
diras la Eternulo: Ne vi konstruos por Mi la domon
por loĝi; 5 ĉar Mi ne loĝis en domo de post tiu tago,
kiam Mi elkondukis Izraelon, ĝis la nuna tempo; sed
Mi estis nur en tabernaklo kaj en tendo. 6 Kien ajn
Mi iris kun la tuta Izrael, ĉu Mi diris eĉ unu vorton
al iu el la juĝistoj de Izrael, al kiuj Mi ordonis paŝti
Mian popolon, dirante: Kial vi ne konstruis por Mi
cedrolignan domon? 7 Kaj nun diru jenon al Mia
servanto David: Tiele diras la Eternulo Cebaot: Mi
prenis vin de ŝafejo, de ŝafoj, por ke vi estu estro
super Mia popolo Izrael; 8 kaj Mi estis kun vi ĉie, kien
vi iris; kaj Mi ekstermis ĉiujn viajn malamikojn antaŭ

vi, kaj Mi faris al vi nomon, egalan al la nomoj de
la potenculoj sur la tero; 9 kaj Mi aranĝis lokon por
Mia popolo Izrael, kaj Mi plantis ĝin tiel, ke ĝi loĝu
trankvile sur sia loko kaj ne plu tremu; kaj malbonuloj
ne plu senfortigos ĝin, kiel antaŭe; 10 kaj de post tiu
tempo, kiam Mi starigis juĝistojn super Mia popolo
Izrael, Mi humiligis ĉiujn viajn malamikojn; kaj Mi
diras al vi, ke domon konstruos al vi la Eternulo. 11
Kiam finiĝos viaj tagoj kaj vi iros al viaj patroj, Mi
starigos post vi vian idon, kiu estos el viaj filoj; kaj Mi
fortikigos lian regnon. 12 Li konstruos por Mi domon;
kaj Mi fortikigos lian tronon por ĉiam. 13 Mi estos al
li patro, kaj li estos al Mi filo; kaj Mian favorkorecon
Mi ne deturnos de li tiel, kiel Mi deturnis de tiu, kiu
estis antaŭ vi. 14 Kaj Mi starigos lin en Mia domo kaj
en Mia regno por ĉiam; kaj lia trono estos fortikigita
por eterne. 15 Konforme al ĉiuj ĉi tiuj vortoj kaj
al ĉi tiu tuta vizio, Natan parolis al David. 16 Kaj
venis la reĝo David kaj sidiĝis antaŭ la Eternulo, kaj
diris: Kiu estas mi, ho Dio Eternulo, kaj kio estas mia
domo, ke Vi venigis min ĝis ĉi tie? 17 Sed eĉ tio estis
nesufiĉa antaŭ Vi, ho Dio, kaj Vi parolis pri la domo
de Via servanto eĉ por la malproksima estonteco, kaj
Vi rigardis min kiel homon alte starantan, ho Dio
Eternulo. 18 Kion pli David povas diri al Vi, por honori
Vian servanton? Vi konas ja Vian servanton. 19 Ho
Eternulo, por Via servanto kaj laŭ Via koro Vi faris
tiun tutan grandaĵon, por montri ĉian grandecon. 20
Ho Eternulo, ne ekzistas simila al Vi, kaj ne ekzistas
Dio krom Vi, laŭ ĉio, kion ni aŭdis per niaj oreloj. 21
Kaj kiu estas simila al Via popolo Izrael, la sola popolo
sur la tero, koncerne kiun Dio iris, por elaĉeti ĝin al
Si kiel popolon, por fari al Si nomon per grandaĵoj
kaj timindaĵoj, forpelante naciojn antaŭ Via popolo,
kiun Vi liberigis el Egiptujo? 22 Vi faris Vian popolon
Izrael Via popolo por eterne; kaj Vi, ho Eternulo, faris
Vin Dio por ĝi. 23 Kaj nun, ho Eternulo, la vorto,
kiun Vi diris pri Via servanto kaj pri lia domo, veriĝu
por eterne, kaj Vi agu tiel, kiel Vi diris. 24 Kaj Via
nomo estu vera kaj granda por eterne, por ke oni
diru: La Eternulo Cebaot, Dio de Izrael, estas Dio al
Izrael; kaj la domo de Via servanto David estu fortika
antaŭ Vi. 25 Ĉar Vi, ho mia Dio, sciigis al la orelo de
Via servanto, ke Vi konstruos al li domon; tial Via
servanto trovis kuraĝon preĝi antaŭ Vi. 26 Kaj nun,
ho Eternulo, Vi estas Dio, kaj Vi diris pri Via servanto
ĉi tiun bonaĵon. 27 Nun komencu beni la domon de
Via servanto, ke ĝi restu eterne antaŭ Vi; ĉar kion Vi,
ho Eternulo, benas, tio restas benita por eterne.

18 Post tio okazis, ke David venkobatis la Filiŝtojn
kaj humiligis ilin, kaj li prenis Gaton kaj ĝiajn
filinurbojn el la manoj de la Filiŝtoj. 2 Li ankaŭ
venkobatis la Moabidojn, kaj la Moabidoj submetiĝis
al David kaj alportis tributojn. 3 Kaj David venkobatis
Hadarezeron, reĝon de Coba, en Ĥamat, kiam tiu iris,
por fortikigi sian regadon super la rivero Eŭfrato. 4
Kaj David venkoprenis de li mil ĉarojn kaj sep mil
rajdantojn kaj dudek mil piedirantojn; kaj David
lamigis ĉiujn ĉarĉevalojn, sed restigis el ili por cent
ĉaroj. 5 La Sirianoj Damaskaj venis, por helpi al
Hadarezer, reĝo de Coba; sed David venkobatis el la
Sirianoj dudek du mil homojn. 6 Kaj David restigis
garnizonojn en la Damaska Sirio, kaj la Sirianoj
submetiĝis al David kaj alportis tributojn. Kaj la
Eternulo helpis al David ĉie, kien li iris. 7 Kaj David
prenis la orajn ŝildojn, kiujn havis sur si la servantoj
de Hadarezer, kaj alportis ilin en Jerusalemon. 8 Kaj el
Tibĥat kaj el Kun, urboj de Hadarezer, David prenis
tre multe da kupro, el kiu poste Salomono faris la
kupran maron, la kolonojn, kaj la kuprajn vazojn. 9
Kiam Tou, reĝo de Ĥamat, aŭdis, ke David venkobatis
la tutan militistaron de Hadarezer, reĝo de Coba, 10
tiam li sendis sian filon Hadoram al la reĝo David, por
saluti lin, kaj gratuli lin pri tio, ke li militis kontraŭ
Hadarezer kaj venkobatis lin (ĉar Tou estis en milito
kontraŭ Hadarezer); kaj li havis kun si ĉiaspecajn
vazojn el oro, arĝento, kaj kupro. 11 Ankaŭ ĉi tiujn
David dediĉis al la Eternulo, kune kun la arĝento
kaj oro, kiun li prenis de ĉiuj nacioj: de Edom, de
Moab, de la Amonidoj, de la Filiŝtoj, kaj de Amalek. 12
Plue Abiŝaj, filo de Ceruja, venkobatis Edomon en la
Valo de Salo, dek ok mil homojn; 13 kaj li restigis en
Edomujo garnizonojn, kaj ĉiuj Edomidoj submetiĝis al
David. Kaj la Eternulo helpis al David ĉie, kien li iris.
14 Kaj David reĝis super la tuta Izrael, kaj li faradis
juĝon kaj justecon al sia tuta popolo. 15 Joab, filo de
Ceruja, estis estro de la militistaro; Jehoŝafat, filo de
Aĥilud, estis kronikisto; 16 Cadok, filo de Aĥitub, kaj
Abimeleĥ, filo de Ebjatar, estis pastroj; kaj Ŝavŝa estis
skribisto; 17 Benaja, filo de Jehojada, estis super la
Keretidoj kaj la Peletidoj; kaj la filoj de David estis la
unuaj apud la reĝo.

19 Okazis poste, ke mortis Naĥaŝ, reĝo de la
Amonidoj, kaj lia filo fariĝis reĝo anstataŭ li. 2
Tiam David diris: Mi estos favorkora al Ĥanun, filo
de Naĥaŝ, ĉar lia patro agis favorkore koncerne min.
Kaj David sendis senditojn, por konsoli lin pri lia
patro. Kaj la servantoj de David venis en la landon
de la Amonidoj, al Ĥanun, por lin konsoli. 3 Sed la
eminentuloj de la Amonidoj diris al Ĥanun: Ĉu efektive
David deziras honori vian patron antaŭ vi, ke li sendis
al vi konsolantojn? ĉu ne venis al vi liaj servantoj
nur por esplori, por ruinigi, kaj por esplorrigardi
la landon? 4 Tiam Ĥanun prenis la servantojn de
David, razigis ilin, detranĉis iliajn vestojn ĝis duono,
ĝis la lumboj, kaj foririgis ilin. 5 Kaj ili iris. Kaj oni
raportis al David pri tiuj viroj, kaj li sendis renkonte
al ili, ĉar la viroj tre hontis. Kaj la reĝo diris: Restu
en Jeriĥo, ĝis rekreskos viaj barboj, kaj tiam revenu.
6 Kiam la Amonidoj vidis, ke ili indignigis kontraŭ
si Davidon, tiam Ĥanun kaj la Amonidoj sendis mil
kikarojn da arĝento, por dungi al si el Mezopotamio,
el Sirio de Maaĥa, kaj el Coba ĉarojn kaj rajdistojn. 7
Kaj ili dungis al si tridek du mil ĉarojn kaj la reĝon de
Maaĥa kun lia popolo. Kaj ili venis kaj stariĝis tendare
antaŭ Medba. Kaj la Amonidoj kolektiĝis el siaj urboj
kaj venis al la milito. 8 Kiam David aŭdis pri tio, li
sendis Joabon kaj la tutan armeon da kuraĝuloj. 9 Kaj
la Amonidoj eliris, kaj batalaranĝiĝis antaŭ la enirejo
de la urbo; kaj la reĝoj venintaj aranĝiĝis aparte, sur
la kampo. 10 Kiam Joab vidis, ke li havos kontraŭ si
batalon antaŭe kaj malantaŭe, li faris elekton el ĉiuj
plejbravuloj en Izrael kaj batalaranĝis ilin kontraŭ la
Sirianoj; 11 la ceteran parton de la popolo li komisiis
al sia frato Abiŝaj, kaj ili batalaranĝis sin kontraŭ la
Amonidoj. 12 Kaj li diris: Se la Sirianoj superfortos
min, tiam vi donos al mi helpon; sed se la Amonidoj
superfortos vin, tiam mi donos al vi helpon; 13 estu
kuraĝa, kaj ni tenu nin forte pro nia popolo kaj pro
la urboj de nia Dio; kaj la Eternulo faru tion, kio
plaĉos al Li. 14 Kaj Joab, kun la popolo, kiu estis
kun li, komencis la batalon kontraŭ la Sirianoj, kaj
ĉi tiuj forkuris antaŭ li. 15 Kiam la Amonidoj vidis,
ke la Sirianoj forkuris, ili ankaŭ forkuris antaŭ lia
frato Abiŝaj, kaj foriris en la urbon. Kaj Joab venis
Jerusalemon. 16 Vidante, ke ili estas venkobatitaj de
la Izraelidoj, la Sirianoj sendis senditojn kaj elirigis
la Sirianojn transriverajn; kaj Ŝofaĥ, la militestro de
Hadarezer, ilin kondukis. 17 Kiam tio estis raportita al
David, li kolektis ĉiujn Izraelidojn, transiris Jordanon,
venis al ili, kaj batalaranĝiĝis kontraŭ ili; David aranĝis
batalon kontraŭ la Sirianoj, kaj ili interbatalis kun
li. 18 Kaj la Sirianoj forkuris antaŭ Izrael, kaj David
mortigis el la Sirianoj sep mil ĉaristojn kaj kvardek
mil piedirantojn; ankaŭ Ŝofaĥon, la militestron, li
mortigis. 19 Kiam la servantoj de Hadarezer vidis, ke
ili estas venkobatitaj de la Izraelidoj, ili faris pacon
kun David kaj submetiĝis al li. Kaj la Sirianoj ne volis
plu helpi al la Amonidoj.

20 Post paso de unu jaro, en la tempo, kiam la reĝoj
eliras milite, Joab kondukis la militistaron kaj
komencis ruinigi la landon de la Amonidoj, kaj li venis
kaj eksieĝis Raban. Sed David restis en Jerusalem. Kaj
Joab venkobatis Raban kaj detruis ĝin. 2 Kaj David
prenis la kronon de Malkam de lia kapo; li trovis,
ke ĝi enhavas laŭpeze kikaron da oro, kaj estis en ĝi
multekosta ŝtono, kiu transiris sur la kapon de David.
Kaj da militakiraĵo li elportis el la urbo tre multe. 3
Kaj la popolon, kiu estis tie, li elirigis, kaj mortigis
per segiloj, feraj draŝiloj, kaj hakiloj. Tiele David agis
kun ĉiuj urboj de la Amonidoj. Kaj David kun la tuta
popolo revenis Jerusalemon. 4 Post tio komenciĝis
milito en Gezer, kontraŭ la Filiŝtoj; tiam Sibĥaj, la
Ĥuŝaido, mortigis Sipajon, unu el la infanoj de la
giganto. Kaj ili humiliĝis. 5 Kaj denove estis milito kun
la Filiŝtoj; kaj Elĥanan, filo de Jair, mortigis Laĥmin,
fraton de Goljat, la Gatano, ĉe kiu la tenilo de lia
lanco estis kiel rultrabo de teksisto. 6 Kaj denove estis
milito en Gat; tie estis viro tre altkreska, kiu havis
po ses fingroj, sume dudek kvar; li ankaŭ naskiĝis al
la giganto. 7 Kiam li insultis Izraelon, lin mortigis
Jonatan, filo de Ŝimea, frato de David. 8 Tiuj naskiĝis
al la giganto en Gat, kaj ili falis de la mano de David
kaj de la manoj de liaj servantoj.

21 Satano leviĝis kontraŭ Izraelon kaj instigis
Davidon kalkuli Izraelon. 2 Kaj David diris al Joab
kaj al la estroj de la popolo: Iru, kalkulu la Izraelidojn,
de Beer-Ŝeba ĝis Dan, kaj raportu al mi, por ke mi sciu
ilian nombron. 3 Joab diris: La Eternulo multigu Sian
popolon centoble; ili ĉiuj, ho reĝo, mia sinjoro, estas ja
servantoj por mia sinjoro; por kio do mia sinjoro tion
postulas? por kio tio fariĝu kulpo sur Izrael? 4 Sed
la vorto de la reĝo superfortis Joabon; tial Joab iris,
trairis la tutan Izraelidaron, kaj venis Jerusalemon. 5
Kaj Joab transdonis al David la rezulton de la kalkulado

de la popolo; kaj montriĝis, ke da Izraelidoj estas
miliono kaj cent mil viroj povantaj eltiri glavon, kaj da
Jehudaidoj kvarcent sepdek mil povantaj eltiri glavon.
6 La Levidojn kaj la Benjamenidojn li ne kalkulis inter
ili, ĉar antipatia estis al Joab la vorto de la reĝo. 7
Kaj tiu afero malplaĉis al Dio, kaj Li frapis Izraelon. 8
Tiam David diris al Dio: Mi forte pekis, farante tiun
aferon. Sed nun, pardonu do la malbonagon de Via
servanto; ĉar mi agis tre malsaĝe. 9 Kaj la Eternulo
parolis al Gad, la viziisto de David, dirante: 10 Iru
kaj diru al David: Tiele diras la Eternulo: Tri punojn
Mi proponas al vi; elektu al vi unu el ili, ke Mi ĝin
faru al vi. 11 Kaj Gad venis al David, kaj diris al li:
Tiele diras la Eternulo: Akceptu por vi: 12 aŭ dum tri
jaroj estos malsato en la lando; aŭ dum tri monatoj
vi estos premata de viaj kontraŭuloj kaj vin atingos
la glavo de viaj malamikoj; aŭ dum tri tagoj regos
en la lando la glavo de la Eternulo kaj pesto, kaj
anĝelo de la Eternulo ekstermados en ĉiuj regionoj
de Izrael. Pripensu do nun, kion mi respondu al mia
Sendinto. 13 Tiam David diris al Gad: Estas al mi tre
malfacile; sed mi falu en la manon de la Eternulo, ĉar
tre granda estas Lia kompatemeco; nur mi ne falu en
manon homan. 14 Kaj la Eternulo venigis peston sur
Izraelon, kaj falis el la Izraelidoj sepdek mil homoj.
15 Kaj Dio sendis anĝelon al Jerusalem, por fari en
ĝi ekstermon. Sed kiam li komencis la ekstermadon,
la Eternulo rigardis, kaj bedaŭris la malbonon, kaj
diris al la anĝelo-ekstermanto: Sufiĉe! nun haltigu
vian manon! La anĝelo de la Eternulo staris tiam
apud la draŝejo de Ornan, la Jebusido. 16 David levis
siajn okulojn, kaj ekvidis la anĝelon de la Eternulo,
starantan inter la tero kaj la ĉielo, kaj tenantan en
sia mano eltiritan glavon, etenditan super Jerusalem.
Tiam David kaj la plejaĝuloj, kovritaj per sakaĵoj, ĵetis
sin vizaĝaltere. 17 Kaj David diris al Dio: Mi estas ja
tiu, kiu ordonis kalkuli la popolon; mi estas tiu, kiu
pekis kaj faris la malbonaĵon; sed kion faris ĉi tiuj
ŝafoj? Ho Eternulo, mia Dio, Via mano estu sur mi kaj
sur la domo de mia patro; sed Vian popolon ne plagu.
18 La anĝelo de la Eternulo diris al Gad, ke li diru al
David, ke David iru kaj starigu altaron al la Eternulo
sur la draŝejo de Ornan, la Jebusido. 19 Tiam David
iris, konforme al la vorto de Gad, kiun li eldiris en
la nomo de la Eternulo. 20 Kiam Ornan sin returnis
kaj ekvidis la anĝelon, li kaj liaj kvar filoj kun li sin
kaŝis. Ornan tiam estis draŝanta tritikon. 21 Kaj David
venis al Ornan. Ornan ekrigardis kaj ekvidis Davidon,
kaj li eliris el la draŝejo kaj adorkliniĝis antaŭ David
vizaĝaltere. 22 David diris al Ornan: Donu al mi la
lokon de la draŝejo, por ke mi konstruu sur ĝi altaron
al la Eternulo; pro ĝia plena prezo donu ĝin al mi,
por ke ĉesiĝu la pesto inter la popolo. 23 Kaj Ornan
diris al David: Prenu al vi; mia sinjoro la reĝo faru
tion, kio plaĉas al li; vidu, mi fordonas la bovojn por
bruloferoj, la draŝilojn por ligno, kaj la tritikon por
farunofero; ĉion mi fordonas. 24 Sed la reĝo David
diris al Ornan: Ne; mi volas aĉeti pro plena prezo; ĉar
mi ne oferportos vian propraĵon al la Eternulo, kaj
mi ne alportos bruloferon senpagan. 25 Kaj David
donis al Ornan pro la loko sescent siklojn da oro.
26 Kaj David konstruis tie altaron al la Eternulo, kaj
alportis bruloferojn kaj pacoferojn, kaj ekvokis al la
Eternulo; kaj Li respondis al li per fajro el la ĉielo sur
la altaron de la brulofero. 27 Kaj la Eternulo ordonis
al la anĝelo, ke li remetu sian glavon en ĝian ingon.
28 En tiu tempo, vidante, ke la Eternulo respondis al li
sur la draŝejo de Ornan, la Jebusido, David alportis
tie oferon. 29 La tabernaklo de la Eternulo, kiun faris
Moseo en la dezerto, kaj la altaro de bruloferoj, estis
en tiu tempo sur altaĵo en Gibeon. 30 Sed David ne
povis iri antaŭ ĝin por demandi Dion; ĉar lin timigis
la glavo de la anĝelo de la Eternulo.

**22** Kaj David diris: Ĉi tie estas la domo de Dio, la
Eternulo, kaj ĉi tio estas altaro por bruloferoj por
Izrael. 2 Kaj David ordonis kunvenigi la fremdulojn, kiuj
estis en la lando de Izrael, kaj li starigis ŝtonhakistojn,
por ĉirkaŭhaki ŝtonojn por la konstruado de la domo
de Dio. 3 Kaj multe da fero por najloj al la pordoj
de la pordegoj kaj por la krampoj pretigis David,
ankaŭ multe da kupro, en nemezurita kvanto; 4 kaj
sennombran kvanton da cedra ligno, ĉar la Cidonanoj
kaj Tiranoj alveturigis al David multe da cedra ligno.
5 Kaj David diris: Mia filo Salomono estas juna kaj
neforta, kaj la domo, kiun oni devas konstrui por la
Eternulo, devas esti granda, por ke Lia nomo kaj gloro
estu konata en ĉiuj landoj. Tial mi preparados por
li. Kaj David multe preparis antaŭ sia morto. 6 Kaj li
alvokis sian filon Salomono, kaj testamentis al li, ke li
konstruu domon por la Eternulo, Dio de Izrael. 7 Kaj
David diris al Salomono: Mia filo, mi havis la intencon
konstrui domon al la nomo de la Eternulo, mia Dio;
8 sed aperis pri mi vorto de la Eternulo, dirante:

Multe da sango vi verŝis, kaj grandajn militojn vi
faris, tial vi ne devas konstrui domon al Mia nomo;
ĉar multe da sango vi verŝis antaŭ Mi sur la teron.
9 Jen filo naskiĝos al vi; li estos homo de paco, kaj
Mi donos al li pacon en rilato al ĉiuj liaj malamikoj
ĉirkaŭe; Salomono estos lia nomo, kaj pacon kaj
trankvilecon Mi donos al Izrael en lia tempo. 10 Li
konstruos domon al Mia nomo; li estos al Mi filo, kaj
Mi estos al li patro; kaj Mi fortikigos la tronon de lia
reĝado super Izrael por ĉiam. 11 Nun, ho mia filo, la
Eternulo estu kun vi, por ke vi sukcesu kaj konstruu
la domon de la Eternulo, via Dio, kiel Li diris pri vi.
12 La Eternulo donu al vi saĝon kaj kompetentecon,
kaj Li faru vin ordonanto super Izrael, por ke vi
plenumadu la instruon de la Eternulo, via Dio. 13
Tiam vi havos sukceson, se vi observos kaj plenumos
la leĝojn kaj preskribojn, kiujn la Eternulo donis per
Moseo al Izrael. Estu forta kaj kuraĝa; ne timu, kaj
ne tremu. 14 Jen mi en mia malriĉeco pretigis por
la domo de la Eternulo cent mil kikarojn da oro, kaj
milionon da kikaroj da arĝento, kaj kupron kaj feron
en nekalkulebla kvanto, ĉar estas multe da ĝi; ankaŭ
lignon kaj ŝtonojn mi pretigis; kaj vi povas aldoni
al tio. 15 Vi havas multe da farontoj de la laboroj,
masonistojn kaj ĉarpentistojn kaj kompetentulojn
pri ĉiaj aferoj. 16 La oro, arĝento, kupro, kaj fero
estas en nekalkulebla kvanto; leviĝu kaj faru, kaj la
Eternulo estu kun vi. 17 Kaj David ordonis al ĉiuj
estroj de Izrael, ke ili helpu lian filon Salomono: 18 La
Eternulo, via Dio, estas ja kun vi, kaj Li donis al vi
trankvilecon ĉiuflanke ĉirkaŭe; ĉar Li transdonis en
miajn manojn la loĝantojn de la lando, kaj la lando
humiliĝis antaŭ la Eternulo kaj antaŭ Lia popolo. 19
Direktu do nun vian koron kaj vian animon, por turni
vin al la Eternulo, via Dio. Leviĝu, kaj konstruu la
sanktejon de la Eternulo Dio, por transporti la keston
de interligo de la Eternulo kaj la sanktajn vazojn de
Dio en la domon, kiu estos konstruita al la nomo de la
Eternulo.

**23** David maljuniĝis kaj atingis sufiĉan aĝon; kaj li
faris Salomonon, sian filon, reĝo super Izrael. 2
Kaj li kunvenigis ĉiujn estrojn de Izrael kaj la pastrojn
kaj la Levidojn. 3 Kaj estis kalkulitaj la Levidoj de
la aĝo de tridek jaroj kaj pli; kaj montriĝis, ke ilia
nombro, kalkulante ĉiujn kapojn de viroj, estis tridek
ok mil. 4 El ili por administri la servadon de la domo
de la Eternulo estis dudek kvar mil; da oficistoj kaj
juĝistoj estis ses mil; 5 kvar mil pordegistoj, kaj
kvar mil glorantoj de la Eternulo per instrumentoj,
kiujn mi faris por glorado. 6 Kaj David dividis ilin
en klasojn laŭ la filoj de Levi: Gerŝon, Kehat, kaj
Merari. 7 La Gerŝonidoj: Ladan kaj Ŝimei. 8 La filoj
de Ladan: la ĉefo Jeĥiel, Zetam, kaj Joel — tri. 9 La
filoj de Ŝimei: Ŝelomit, Ĥaziel, kaj Haran — tri. Tio
estas la ĉefoj de patrodomoj de Ladan. 10 Kaj la filoj
de Ŝimei: Jaĥat, Zina, Jeuŝ, kaj Beria. Tio estas la filoj
de Ŝimei — kvar. 11 Jaĥat estis la ĉefo, Zina estis la
dua; Jeuŝ kaj Beria havis nemulte da infanoj, tial ili ĉe
la kalkulado prezentis unu patrodomon. 12 La filoj
de Kehat: Amram, Jichar, Ĥebron, kaj Uziel — kvar.
13 La filoj de Amram: Aaron kaj Moseo. Aaron estis
apartigita kaj sanktigita por la plejsanktejo, li kaj liaj
idoj por ĉiam, por incensadi antaŭ la Eternulo, por
servadi al Li kaj por benadi en Lia nomo eterne. 14
Moseo estis homo de Dio, kaj liaj idoj estis alkalkulitaj
al la tribo de Levi. 15 La filoj de Moseo: Gerŝom kaj
Eliezer. 16 La filoj de Gerŝom: Ŝebuel estis la ĉefo. 17
La filoj de Eliezer estis: Reĥabja, la unua; aliajn filojn
Eliezer ne havis; sed Reĥabja havis tre multe da filoj.
18 La filoj de Jichar: Ŝelomit, la unua. 19 La filoj de
Ĥebron: la unua estis Jerija, la dua estis Amarja, la
tria estis Jaĥaziel, la kvara estis Jekameam. 20 La filoj
de Uziel: Miĥa, la unua, kaj Jiŝija, la dua. 21 La filoj de
Merari: Maĥli kaj Muŝi. La filoj de Maĥli: Eleazar kaj
Kiŝ. 22 Eleazar mortis, kaj li ne havis filojn, sed nur
filinojn; kaj ilin prenis al si la filoj de Kiŝ, iliaj kuzoj.
23 La filoj de Muŝi: Maĥli, Eder, kaj Jeremot — tri. 24
Tio estas la idoj de Levi laŭ iliaj patrodomoj, la ĉefoj
de patrodomoj laŭ ilia kalkulo, laŭ ilia laŭnoma kaj
laŭkapa nombro, kiuj faradis la laboron de servado
en la domo de la Eternulo, komencante de la aĝo de
dudek jaroj kaj plue. 25 Ĉar David diris: La Eternulo,
Dio de Izrael, donis ripozon al Sia popolo; kaj Li
enloĝiĝis en Jerusalem por ĉiam. 26 Kaj la Levidoj ne
bezonis portadi la tabernaklon kaj ĉiujn ĝiajn vazojn
por la servado en ĝi. 27 Laŭ la lastaj ordonoj de David
estis kalkulitaj la Levidoj, havantaj la aĝon de dudek
jaroj kaj pli. 28 Ilia ofico estis helpi al la Aaronidoj
ĉe la servado en la domo de la Eternulo, zorgi pri la
kortoj, pri la ĉambroj, pri la pureco de ĉio sankta, kaj
plenumi la laboron en la domo de Dio; 29 zorgi pri la
pano de propono, pri la faruno por farunoferoj, pri la
macoj, pri la patoj, pri la rostado, kaj pri ĉia mezurado

kaj pesado; 30 stari ĉiumatene, por kanti laŭdon kaj
gloron al la Eternulo, tiel same ankaŭ vespere; 31
fari ĉiujn bruloferojn al la Eternulo en la sabatoj,
monatkomencoj, kaj festoj, laŭ ilia nombro, laŭ la
preskribo pri ili, ĉiam antaŭ la Eternulo; 32 servi por
deĵorado ĉe la tabernaklo de kunveno, ĉe la sanktaĵoj,
kaj apud siaj fratoj la Aaronidoj ĉe la servado en la
domo de la Eternulo.

**24** La ordo de la Aaronidoj: la filoj de Aaron: Nadab,
Abihu, Eleazar, kaj Itamar. 2 Nadab kaj Abihu
mortis pli frue ol ilia patro, kaj filojn ili ne havis; kaj
Eleazar kaj Itamar fariĝis pastroj. 3 La ordon aranĝis
David, kaj Cadok el la idoj de Eleazar, kaj Aĥimeleĥ
el la idoj de Itamar, laŭ iliaj oficoj ĉe ilia servado. 4
Montriĝis, ke inter la idoj de Eleazar estis pli granda
nombro da viroj, ol inter la idoj de Itamar. Oni dividis
ilin: por la idoj de Eleazar estis dek ses ĉefoj de
patrodomoj, kaj por la idoj de Itamar ok patrodomoj.
5 Oni dividis ilin per lotado, ambaŭ partojn paralele,
ĉar la estroj de la sanktejo kaj la estroj en la aferoj de
Dio estis el la idoj de Eleazar kaj el la idoj de Itamar. 6
Kaj enskribis ilin Ŝemaja, filo de Netanel, skribisto el
la Levidoj, antaŭ la reĝo kaj la estroj, antaŭ la pastro
Cadok, antaŭ Aĥimeleĥ, filo de Ebjatar, kaj antaŭ la
ĉefoj de patrodomoj de la pastroj kaj de la Levidoj;
unu loto estis por patrodomo de Eleazaridoj, kaj unu
loto estis por patrodomo de Itamaridoj. 7 La unua
loto eliris por Jehojarib, la dua por Jedaja, 8 la tria por
Ĥarim, la kvara por Seorim, 9 la kvina por Malkija, la
sesa por Mijamin, 10 la sepa por Hakoc, la oka por
Abija, 11 la naŭa por Jeŝua, la deka por Ŝeĥanja, 12 la
dek-unua por Eljaŝib, la dek-dua por Jakim, 13 la dek-
tria por Ĥupa, la dek-kvara por Jeŝebab, 14 la dek-
kvina por Bilga, la dek-sesa por Imer, 15 la dek-sepa
por Ĥezir, la dek-oka por Hapicec, 16 la dek-naŭa por
Petaĥja, la dudeka por Jeĥezkel, 17 la dudek-unua
por Jaĥin, la dudek-dua por Gamul, 18 la dudek-tria
por Delaja, la dudek-kvara por Maazja. 19 Tio estis
ilia ordo ĉe ilia servado, por iri en la domon de la
Eternulo laŭ la preskribo donita per ilia patro Aaron,
kiel ordonis al li la Eternulo, Dio de Izrael. 20 La ordo
por la ceteraj idoj de Levi: el la idoj de Amram: Ŝubael;
el la idoj de Ŝubael: Jeĥdeja; 21 ĉe Reĥabja: el la idoj
de Reĥabja la unua estis Jiŝija; 22 ĉe la Jicharidoj:
Ŝelomot; el la filoj de Ŝelomot: Jaĥat; 23 la filoj de
Ĥebron: Jerija, Amarja estis la dua, Jaĥaziel la tria,
Jekameam la kvara; 24 el la filoj de Uziel: Miĥa; el la
filoj de Miĥa: Ŝamir; 25 la frato de Miĥa estis Jiŝija; el
la filoj de Jiŝija: Zeĥarja; 26 el la filoj de Merari: Maĥli
kaj Muŝi; el la filoj de Jaazija: Beno; 27 el la idoj de
Merari: ĉe Jaazija: Beno, Ŝoham, Zakur, kaj Ibri; 28 ĉe
Maĥli: Eleazar; li ne havis filojn; 29 ĉe Kiŝ: el la filoj de
Kiŝ: Jeraĥmeel; 30 la filoj de Muŝi: Maĥli, Eder, kaj
Jerimot. Tio estas la Levidoj laŭ iliaj patrodomoj. 31 Ili
ankaŭ lotis samtempe kun siaj fratoj la Aaronidoj,
antaŭ la reĝo David, Cadok, Aĥimeleĥ, kaj la ĉefoj de
patrodomoj de la pastroj kaj de la Levidoj: ĉefo de
patrodomo egale kun sia pli malgranda frato.

**25** David kaj la militestroj apartigis por la servado
filojn de Asaf, de Heman, kaj de Jedutun, kiuj
estis inspiritaj por harpoj, psalteroj, kaj cimbaloj. Ili
estis kalkulitaj por sia servado: 2 el la filoj de Asaf:
Zakur, Jozef, Netanja, kaj Aŝarela, filoj de Asaf, sub
gvidado de Asaf, kiu kantis ĉe la reĝo. 3 De Jedutun,
la filoj de Jedutun: Gedalja, Ceri, Jeŝaja, Ĥaŝabja,
kaj Matitja, ses, sub gvidado de sia patro Jedutun,
kiu ludis inspirite sur harpo, por laŭdi kaj glori la
Eternulon. 4 De Heman, la filoj de Heman: Bukija,
Matanja, Uziel, Ŝebuel, Jerimot, Ĥananja, Ĥanani,
Eliata, Gidalti, Romamti-Ezer, Joŝbekaŝa, Maloti, Hotir,
kaj Maĥaziot. 5 Ĉiuj ili estis filoj de Heman, viziisto de
la reĝo koncerne la vortojn de Dio, por levi la kornon.
Dio donis al Heman dek kvar filojn kaj tri filinojn.
6 Ĉiuj ĉi tiuj estis sub la gvidado de siaj patroj ĉe la
kantado en la domo de la Eternulo, kun cimbaloj,
psalteroj, kaj harpoj, ĉe la servado en la domo de Dio,
sub la gvidado de la reĝo, Asaf, Jedutun, kaj Heman. 7
Ilia nombro, kune kun iliaj fratoj, instruitaj por kanti
antaŭ la Eternulo, ĉiuj kompetentuloj, estis ducent
okdek ok. 8 Ili lotis pri la vico de sia deĵorado, la
malgrandaj egale kiel la grandaj, kompetentulo egale
kiel lernanto. 9 La unua loto eliris ĉe Asaf por Jozef; la
dua por Gedalja; li kun siaj fratoj kaj siaj filoj estis dek
du; 10 la tria por Zakur; liaj filoj kaj fratoj estis dek
du; 11 la kvara por Jicri; liaj filoj kaj fratoj estis dek
du; 12 la kvina por Netanja; liaj filoj kaj fratoj estis
dek du; 13 la sesa por Bukija; liaj filoj kaj fratoj estis
dek du; 14 la sepa por Jeŝarela; liaj filoj kaj fratoj estis
dek du; 15 la oka por Jeŝaja; liaj filoj kaj fratoj estis
dek du; 16 la naŭa por Matanja; liaj filoj kaj fratoj estis
dek du; 17 la deka por Ŝimei; liaj filoj kaj fratoj estis
dek du; 18 la dek-unua por Azarel; liaj filoj kaj fratoj

estis dek du; 19 la dek-dua por Ĥaŝabja; liaj filoj kaj
fratoj estis dek du; 20 la dek-tria por Ŝubael; liaj filoj
kaj fratoj estis dek du; 21 la dek-kvara por Matitja;
liaj filoj kaj fratoj estis dek du; 22 la dek-kvina por
Jeremot; liaj filoj kaj fratoj estis dek du; 23 la dek-sesa
por Ĥananja; liaj filoj kaj fratoj estis dek du; 24 la dek-
sepa por Joŝbekaŝa; liaj filoj kaj fratoj estis dek du; 25
la dek-oka por Ĥanani; liaj filoj kaj fratoj estis dek du;
26 la dek-naŭa por Maloti; liaj filoj kaj fratoj estis dek
du; 27 la dudeka por Eliata; liaj filoj kaj fratoj estis
dek du; 28 la dudek-unua por Hotir; liaj filoj kaj fratoj
estis dek du; 29 la dudek-dua por Gidalti; liaj filoj kaj
fratoj estis dek du; 30 la dudek-tria por MaĥHaziot;
liaj filoj kaj fratoj estis dek du; 31 la dudek-kvara por
Romamti-Ezer; liaj filoj kaj fratoj estis dek du.

**26** La klasoj de la pordegistoj: el la KoraĤidoj:
Meŝelemja, filo de Kore, el la filoj de Asaf. 2
Meŝelemja havis filojn: la unuenaskito estis ZeĤarja,
la dua estis Jediael, la tria estis Zebadja, la kvara estis
Jatniel; 3 la kvina estis Elam, la sesa estis JehoĤanan,
la sepa estis Eljehoenaj. 4 Obed-Edom havis filojn:
Ŝemaja estis la unuenaskito, Jehozabad la dua, JoaĤ
la tria, SaĤar la kvara, Netanel la kvina, 5 Amiel la
sesa, IsaĤar la sepa, Peultaj la oka; ĉar benis lin Dio.
6 Al lia filo Ŝemaja naskiĝis filoj, kiuj regis en siaj
patrodomoj, ĉar ili estis bravaj homoj. 7 La filoj de
Ŝemaja: Otni, Refael, Obed, Elzabad, liaj fratoj, bravaj
homoj, Elihu kaj SemaĤja. 8 Ĉiuj ili estis el la idoj de
Obed-Edom; ili kaj iliaj filoj kaj iliaj fratoj estis bravaj
homoj, taŭgaj por servado: sesdek du ili estis ĉe Obed-
Edom. 9 Meŝelemja havis filojn kaj fratojn, bravajn
homojn dek ok. 10 Ĥosa el la Merariidoj havis filojn:
Ŝimri estis la ĉefo (kvankam li ne estis unuenaskito,
tamen lia patro faris lin ĉefo), 11 Ĥilkija estis la dua,
Tebalja la tria, ZeĤarja la kvara; ĉiuj filoj kaj fratoj de
Ĥosa estis dek tri. 12 Al tiuj grupoj da pordegistoj, al la
ĉefoj de viroj, estis komisiita la servado en la domo de
la Eternulo kune kun iliaj fratoj. 13 Kaj ili lotis, kiel la
malgrandaj, tiel ankaŭ la grandaj, laŭ siaj patrodomoj,
por ĉiu pordego aparte. 14 Kaj la loto pri la oriento
falis por Ŝelemja; kaj pri lia filo ZeĤarja, la saĝa
konsilanto, oni lotis, kaj lia loto eliris por la nordo;
15 pri Obed-Edom por la sudo, kaj pri liaj filoj por la
provizejo; 16 pri Ŝupim kaj Ĥosa por la okcidento,
por la Pordego ŜaleĤet, kie la vojo leviĝas, kie gardo
staras apud gardo. 17 Oriente estis ses Levidoj, norde
kvar ĉiutage, sude kvar ĉiutage, kaj ĉe la provizejoj po
du. 18 Ĉe la alirejo okcidente estis: kvar ĉe la vojo, kaj
du ĉe la alirejo. 19 Tio estis la grupoj da pordegistoj
el la KoraĤidoj kaj el la Merariidoj. 20 El la Levidoj,
AĤija estis super la trezoroj de la domo de Dio kaj
super la trezoroj de la sanktaĵoj. 21 El la idoj de Ladan,
idoj de la Gerŝonido Ladan, ĉefoj de patrodomoj de la
Gerŝonido Ladan estis la JeĤielidoj. 22 La JeĤielidoj:
Zetam, kaj Joel, lia frato, estis super la trezoroj de la
domo de la Eternulo. 23 El la Amramidoj, Jicharidoj,
Ĥebronidoj, kaj Uzielidoj, 24 Ŝebuel, ido de Gerŝom,
filo de Moseo, estis estro super la trezoroj. 25 Lia
frato Eliezer havis filon ReĤabja; lia filo estis Jeŝaja,
lia filo estis Joram, lia filo estis ZiĤri, kaj lia filo estis
Ŝelomit. 26 Ĉi tiu Ŝelomit kaj liaj fratoj estis super ĉiuj
trezoroj de la sanktaĵoj, kiujn sanktigis la reĝo David,
la ĉefoj de patrodomoj, la milestroj, kaj la centestroj,
kaj la militestroj. 27 El la militoj kaj el la militakiraĵoj
ili konsekris partojn, por subteni la domon de la
Eternulo. 28 Ankaŭ ĉio, kion sanktigis la antaŭvidisto
Samuel, kaj Saul, filo de Kiŝ, kaj Abner, filo de Ner, kaj
Joab, filo de Ceruja, ĉio sanktigita estis sub la gardado
de Ŝelomit kaj liaj fratoj. 29 El la Jicharidoj, Kenanja
kaj liaj filoj estis por la aferoj eksteraj de Izrael, kiel
inspektistoj kaj juĝistoj. 30 El la Ĥebronidoj, Ĥaŝabja
kaj liaj fratoj, bravaj homoj, mil sepcent, havis oficojn
en Izrael transe de Jordan, okcidente, por ĉiuj aferoj
koncernantaj la Eternulon kaj por la aferoj de la reĝo.
31 El la Ĥebronidoj, Jerija estis ĉefo de la Ĥebronidoj
en iliaj generacioj kaj patrodomoj. En la kvardeka
jaro de la reĝado de David ili estis esploritaj, kaj oni
trovis ĉe ili bravajn homojn en Jazer en Gilead. 32
Kaj liaj fratoj, bravaj homoj, du mil sepcent, ĉefoj de
patrodomoj; al ili la reĝo David donis oficojn ĉe la
Rubenidoj, la Gadidoj, kaj la duontribo de Manase,
por ĉiuj aferoj de Dio kaj aferoj de la reĝo.

**27** La Izraelidoj havis laŭ sia nombro ĉefojn de
patrodomoj, milestrojn, centestrojn, kaj siajn
inspektistojn, kiuj servis al la reĝo pri ĉiuj aferoj de
la apartaĵoj, interŝanĝante sin ĉiumonate, en ĉiuj
monatoj de la jaro. Ĉiu apartaĵo konsistis el dudek
kvar mil. 2 Super la unua apartaĵo en la unua monato
estis Jaŝobeam, filo de Zabdiel; en lia apartaĵo estis
dudek kvar mil; 3 li estis el la idoj de Perec, la ĉefo
de ĉiuj militestroj por la unua monato. 4 Super la
apartaĵo de la dua monato estis Dodaj, la AĤoĤido;

en lia apartaĵo estis ankaŭ la princo Miklot; en lia
apartaĵo estis dudek kvar mil. 5 La tria militestro, por
la tria monato, estis Benaja, filo de la pastro Jehojada;
en lia apartaĵo estis dudek kvar mil. 6 Ĉi tiu Benaja
estis el la tridek herooj, kaj estro super ili; en lia
apartaĵo estis lia filo Amizabad. 7 La kvara, por la
kvara monato, estis Asahel, frato de Joab, kaj post li
lia filo Zebadja; en lia apartaĵo estis dudek kvar mil. 8
La kvina, por la kvina monato, estis la estro Ŝamhut,
la Jizraĥido; en lia apartaĵo estis dudek kvar mil. 9
La sesa, por la sesa monato, estis Ira, filo de Ikeŝ, la
Tekoaano; en lia apartaĵo estis dudek kvar mil. 10 La
sepa, por la sepa monato, estis Ĥelec, la Pelonano, el
la Efraimidoj; en lia apartaĵo estis dudek kvar mil. 11
La oka, por la oka monato, estis Sibĥaj, la Ĥuŝaido, el
la Zeraĥidoj; en lia apartaĵo estis dudek kvar mil. 12 La
naŭa, por la naŭa monato, estis Abiezer, la Anatotano,
el la Benjamenidoj; en lia apartaĵo estis dudek kvar
mil. 13 La deka, por la deka monato, estis Maharaj, la
Netofaano, el la Zeraĥidoj; en lia apartaĵo estis dudek
kvar mil. 14 La dek-unua, por la dek-unua monato,
estis Benaja, la Piratonano, el la Efraimidoj; en lia
apartaĵo estis dudek kvar mil. 15 La dek-dua, por
la dek-dua monato, estis Ĥeldaj, la Netofaano, el la
Otnielidoj; en lia apartaĵo estis dudek kvar mil. 16 Kaj
super la triboj de Izrael: la estro de la Rubenidoj estis
Eliezer, filo de Ziĥri; de la Simeonidoj: Ŝefatja, filo de
Maaĥa; 17 de la Levidoj: Ĥaŝabja, filo de Kemuel; de
la Aaronidoj: Cadok; 18 de la Jehudaidoj: Elihu, el la
fratoj de David; de la Isaĥaridoj: Omri, filo de Miĥael;
19 de la Zebulunidoj: Jiŝmaja, filo de Obadja; de la
Naftaliidoj: Jerimot, filo de Azriel; 20 de la Efraimidoj:
Hoŝea, filo de Azazja; de la duontribo de Manase:
Joel, filo de Pedaja; 21 de la duontribo de Manase
en Gilead: Jido, filo de Zeĥarja; de la Benjamenidoj:
Jaasiel, filo de Abner; 22 de la Danidoj: Azarel, filo de
Jeroĥam. Tio estis la estroj de la triboj de Izrael. 23 Sed
David ne faris kalkulon de tiuj, kiuj havis la aĝon de
malpli ol dudek jaroj; ĉar la Eternulo promesis multigi
Izraelon simile al la steloj de la ĉielo. 24 Joab, filo de
Ceruja, komencis la kalkuladon, sed ne finis. Kaj pro
tio estis kolero kontraŭ Izrael; kaj tiu kalkulado ne
estas enportita en la kronikon pri la reĝo David. 25
Super la trezoroj de la reĝo estis Azmavet, filo de
Adiel; super la trezoroj sur la kampo, en la urboj,
en la vilaĝoj, kaj en la turoj estis Jonatan, filo de
Uzija. 26 Super la plenumantoj de la laboroj sur la
kampo, super la terkultivo, estis Ezri, filo de Kelub.
27 Super la vinberĝardenoj estis Ŝimei, la Ramaano;
super la provizoj de vino en la vinberĝardenoj estis
Zabdi, la Ŝefamano. 28 Super la olivarboj kaj super
la sikomoroj, kiuj estis en la valo, estis Baal-Ĥanan,
la Gederano; super la provizoj de oleo estis Joaŝ. 29
Super la bovoj, kiuj paŝtiĝis en Ŝaron, estis Ŝitraj, la
Ŝaronano; super la bovoj en la valoj estis Ŝafat, filo
de Adlaj. 30 Super la kameloj estis Obil, la Iŝmaelido;
super la azeninoj estis Jeĥdeja, la Meronotano. 31
Super la ŝafoj estis Jaziz, la Hagarido. Ĉiuj ĉi tiuj estis
estroj super la havaĵoj, kiujn posedis la reĝo David. 32
Jonatan, onklo de David, estis konsilisto; li estis homo
kompetenta kaj klera; Jeĥiel, filo de Ĥaĥmoni, estis ĉe
la filoj de la reĝo. 33 Aĥitofel estis konsilisto de la
reĝo; Ĥuŝaj, la Arkano, estis amiko de la reĝo. 34 Post
Aĥitofel estis Jehojada, filo de Benaja, kaj Ebjatar; la
militestro de la reĝo estis Joab.

28 David kunvenigis en Jerusalemon ĉiujn estrojn
de Izrael, la estrojn de la triboj, la estrojn de
la apartaĵoj, kiuj servis al la reĝo, la milestrojn kaj
centestrojn, la estrojn super ĉiuj havaĵoj kaj super la
brutoj de la reĝo kaj de liaj filoj, ankaŭ la korteganojn,
heroojn, kaj ĉiujn distingitojn. 2 Kaj la reĝo David
stariĝis sur siaj piedoj, kaj diris: Aŭskultu min, ho miaj
fratoj kaj mia popolo! Mi intencis konstrui domon de
ripozo por la kesto de interligo de la Eternulo kaj por
piedbenketo por nia Dio, kaj mi preparis min, por
konstrui. 3 Sed Dio diris al mi: Ne konstruu domon al
Mia nomo, ĉar vi estas homo de milito kaj vi verŝadis
sangon. 4 Tamen la Eternulo, Dio de Izrael, elektis
min el la tuta domo de mia patro, por ke mi estu
reĝo super Izrael por ĉiam; ĉar Jehudan Li elektis kiel
reganton, kaj en la domo de Jehuda la domon de mia
patro, kaj inter la filoj de mia patro Li favoris min,
farante min reĝo super la tuta Izrael. 5 Kaj el ĉiuj miaj
filoj — ĉar multe da filoj donis al mi la Eternulo — Li
elektis mian filon Salomono, ke li sidu sur la trono de
la reĝado de la Eternulo super Izrael. 6 Kaj Li diris al
mi: Via filo Salomono, li konstruos Mian domon kaj
Miajn kortojn; ĉar Mi elektis lin al Mi kiel filon, kaj Mi
estos al li patro. 7 Kaj Mi fortikigos lian regnon por
ĉiam, se li persistos en la plenumado de Miaj ordonoj
kaj preskriboj kiel ĝis nun. 8 Kaj nun antaŭ la okuloj
de la tuta Izrael, la komunumo de la Eternulo, kaj
antaŭ la oreloj de nia Dio: observu kaj atentu ĉiujn

ordonojn de la Eternulo, via Dio, por ke vi posedu ĉi
tiun bonan landon kaj heredigu ĝin al viaj infanoj post
vi eterne. 9 Kaj vi, mia filo Salomono, konu la Dion de
via patro, kaj servu al Li el plena koro kaj kun animo
sincera; ĉar ĉiujn korojn la Eternulo esploras, kaj
ĉiujn pensojn kaj intencojn Li komprenas. Se vi serĉos
Lin, vi Lin trovos; kaj se vi forlasos Lin, Li forpuŝos
vin por ĉiam. 10 Vidu nun, kiam la Eternulo elektis
vin, por konstrui domon por la sanktejo; estu forta,
kaj agu. 11 Kaj David donis al sia filo Salomono la
desegnon de la portiko, de la domoj, provizejoj, supraj
ĉambroj, internaj ĉambroj, kaj de la loko por la sankta
kesto; 12 kaj la desegnon de ĉio, kion li havis en sia
animo koncerne la kortojn de la domo de la Eternulo
kaj koncerne ĉiujn ĉambrojn ĉirkaŭe, koncerne la
trezorojn de la domo de Dio kaj la trezorojn de la
sanktaĵoj, 13 koncerne la ordojn de la pastroj kaj de la
Levidoj, koncerne la tutan servadon en la domo de
la Eternulo, kaj koncerne ĉiujn objektojn de servado
en la domo de la Eternulo; 14 ankaŭ la oron, laŭ la
pezo de la oro por ĉiuj objektoj de servado, kaj la
pezon de ĉiuj arĝentaj objektoj de servado; 15 ankaŭ la
pezon de la oraj kandelabroj kaj de iliaj oraj lucernoj,
montrante aparte la pezon de ĉiu kandelabro kaj de
ĝiaj lucernoj, kaj la pezon de la arĝentaj kandelabroj,
de ĉiu kandelabro kaj de ĝiaj lucernoj, laŭ la destino
de ĉiu kandelabro. 16 Li donis ankaŭ la pezon de la
oro por la tabloj de propono, por ĉiu tablo aparte,
kaj de la arĝento por la tabloj arĝentaj; 17 ankaŭ
por la forkoj, aspergaj kalikoj, tasoj el pura oro, oraj
pelvoj, montrante la pezon por ĉiu pelvo aparte, kaj
por la arĝentaj pelvoj, montrante la pezon de ĉiu
pelvo; 18 ankaŭ la pezon de la incensaltaro el refandita
oro. Li donis ankaŭ desegnon de la ĉaro kun la oraj
keruboj, kiuj etendas la flugilojn kaj ŝirmas la keston
de interligo de la Eternulo. 19 Ĉio ĉi tio, li diris, estas
skribita al mi de la mano de la Eternulo; Li klarigis al
mi ĉiujn detalojn de la desegno. 20 Kaj David diris al
sia filo Salomono: Estu forta kaj kuraĝa, kaj agu; ne
timu, kaj ne tremu; ĉar Dio la Eternulo, mia Dio, estas
kun vi; Li ne deturnos Sin de vi kaj ne forlasos vin, ĝis
vi finos la tutan aferon por la servado en la domo de
la Eternulo. 21 Kaj jen estas la ordoj de la pastroj kaj
de la Levidoj por ĉia servado en la domo de Dio; ili
estos kun vi por ĉiu faro, kun fervoro kaj lerteco en
ĉiu laboro; kaj la estroj kaj la tuta popolo plenumos
ĉiujn viajn vortojn.

29 Kaj la reĝo David diris al la tuta komunumo: Mia
filo Salomono, la sola, kiun elektis la Eternulo,
estas juna kaj neforta, kaj la laboro estas granda; ĉar
ne por homo estas la loĝejo, sed por Dio la Eternulo.
2 Mi preparis per mia tuta forto por la domo de
mia Dio oron por la oraj objektoj, arĝenton por la
arĝentaj, kupron por la kupraj, feron por la feraj,
lignon por la lignaj, ŝtonojn oniksajn kaj ŝtonojn
enkadrigitajn, ŝtonojn belajn kaj diverskolorajn, kaj
ĉiaspecajn ŝtonojn multekostajn, kaj multe da ŝtonoj
marmoraj. 3 Krom tio, pro mia amo al la domo de mia
Dio, mian propran trezoron de oro kaj arĝento, kiun
mi havas, mi fordonas por la domo de mia Dio, krom
tio, kion mi pretigis por la sankta domo: 4 tri mil
kikarojn da oro, el la oro de Ofir, kaj sep mil kikarojn
da arĝento refandita, por tegi la murojn de la domoj; 5
oron por la oraj objektoj, arĝenton por la arĝentaj, kaj
por ĉiuj laborotaĵoj de la majstroj. Tamen kiu ankoraŭ
deziras oferi hodiaŭ por la Eternulo? 6 Kaj oferis la
ĉefoj de patrodomoj, la estroj de la triboj de Izrael, la
milestroj kaj centestroj, kaj la estroj super la aferoj de
la reĝo; 7 kaj ili donis por la bezonoj de la domo de Dio
kvin mil kikarojn da oro kaj dek mil darkemonojn, kaj
dek mil kikarojn da arĝento, kaj dek ok mil kikarojn da
kupro, kaj cent mil kikarojn da fero. 8 Kaj tiuj, ĉe kiuj
troviĝis multekostaj ŝtonoj, donis ilin por la trezorejo
de la domo de la Eternulo, en la manojn de Jeĥiel, la
Gerŝonido. 9 Kaj la popolo ĝojis pro tiu oferado, ĉar
el plena koro ili oferis al la Eternulo; ankaŭ la reĝo
David ĝojis tre forte. 10 Kaj David benis la Eternulon
antaŭ la okuloj de la tuta komunumo, kaj David diris:
Estu benata, ho Eternulo, Dio de nia patro Izrael,
eterne kaj eterne. 11 Al Vi, ho Eternulo, apartenas
grandeco, potenco, majesto, venko, kaj gloro, ĉar ĉio
en la ĉielo kaj sur la tero estas Via; al Vi, ho Eternulo,
apartenas la reĝado, kaj Vi estas alte super ĉiuj estroj.
12 Riĉeco kaj honoro venas de Vi; Vi regas super ĉio;
en Via mano estas forto kaj potenco; Via mano povas
ĉion grandigi kaj fortikigi. 13 Kaj nun, ho nia Dio, ni
dankas Vin, kaj ni gloras Vian majestan nomon. 14
Ĉar kiu estas mi, kaj kio estas mia popolo, ke mi havis
la forton, por oferi tiom? de Vi estas ĉio, kaj el Via
mano ni donis al Vi. 15 Pasloĝantoj kaj enmigrintoj ni
estas apud Vi, kiel ĉiuj niaj patroj; kiel ombro estas
niaj tagoj sur la tero, nenio fortika. 16 Ho Eternulo,
nia Dio! ĉi tiu tuta abundaĵo, kiun ni preparis, por
konstrui al Vi domon, al Via sankta nomo, estas el

Via mano, al Vi ĉio apartenas. 17 Mi scias, ho mia
Dio, ke Vi esploras la koron kaj ke sincereco plaĉas
al Vi; el sincera koro mi oferis ĉion ĉi tion; kaj nun
mi vidas kun ĝojo Vian popolon, kiu troviĝas ĉi tie,
ke ĝi oferas al Vi. 18 Ho Eternulo, Dio de niaj patroj
Abraham, Isaak, kaj Izrael! konservu ĝin por ĉiam, ĉi
tiun pensmanieron de la koro de Via popolo, kaj turnu
ilian koron al Vi. 19 Kaj al mia filo Salomono donu
koron perfektan, ke li observu Viajn ordonojn, Viajn
preskribojn, kaj Viajn leĝojn, ke li ĉion plenumu,
kaj ke li konstruu la konstruaĵon, por kiu mi faris la
preparojn. 20 Kaj David diris al la tuta komunumo:
Benu la Eternulon, vian Dion. Kaj la tuta komunumo
benis la Eternulon, Dion de iliaj patroj; kaj ili kliniĝis
kun adoro antaŭ la Eternulo kaj antaŭ la reĝo. 21 Kaj
ili faris buĉoferojn al la Eternulo. Kaj en la sekvanta
tago ili alportis bruloferojn al la Eternulo: mil bovojn,
mil virŝafojn, mil ŝafidojn, kune kun iliaj verŝoferoj,
kaj multe da oferoj por la tuta Izrael. 22 Kaj ili manĝis
kaj trinkis antaŭ la Eternulo en tiu tago kun granda
ĝojo. Kaj duafoje ili faris reĝo Salomonon, filon de
David, kaj sanktoleis lin kiel reganton, kaj Cadokon
kiel pastron. 23 Kaj Salomono suriris sur la tronon de
la Eternulo kiel reĝo anstataŭ sia patro David; kaj li
havis sukceson, kaj la tuta Izrael obeadis lin. 24 Kaj
ĉiuj estroj kaj eminentuloj, kaj ankaŭ ĉiuj filoj de la
reĝo David, submetis sin al la reĝo Salomono. 25 Kaj la
Eternulo forte altigis Salomonon antaŭ la okuloj de
la tuta Izrael, kaj metis sur lin reĝan majeston, kiu
antaŭe estis sur neniu el la reĝoj de Izrael. 26 David,
filo de Jiŝaj, estis reĝo super la tuta Izrael. 27 La tempo,
dum kiu li reĝis super Izrael, estis kvardek jaroj: en
Ĥebron li reĝis sep jarojn, kaj en Jerusalem li reĝis
tridek tri jarojn. 28 Kaj li mortis en bona maljuneco,
sata de aĝo, riĉeco, kaj gloro; kaj anstataŭ li ekreĝis
lia filo Salomono. 29 La historio de la reĝo David, la
antaŭa kaj la posta, estas priskribita en la kroniko de
la antaŭvidisto Samuel, en la kroniko de la profeto
Natan, kaj en la kroniko de la viziisto Gad; 30 lia tuta
reĝado, lia potenco, kaj la tempo, kiun travivis li kaj
Izrael kaj ĉiuj regnoj de la landoj.

# 2 Kroniko

**1** Salomono, filo de David, fortikiĝis en sia regno; kaj
la Eternulo, lia Dio, estis kun li kaj levis lin alte. **2**
Kaj Salomono kunvokis la tutan Izraelon, la milestrojn
kaj centestrojn, la juĝistojn, kaj ĉiujn estrojn en la
tuta Izrael, la ĉefojn de la patrodomoj. **3** Kaj Salomono
kune kun la tuta komunumo iris al la altaĵo en Gibeon,
ĉar tie estis la tabernaklo de kunveno de Dio, tiu, kiun
faris Moseo, servanto de la Eternulo, en la dezerto.
**4** Sed la keston de Dio David estis transportinta el
Kirjat-Jearim sur tiun lokon, kiun David pretigis por
ĝi; ĉar li aranĝis por ĝi tendon en Jerusalem. **5** La
kupra altaro, kiun faris Becalel, filo de Uri, filo de
Ĥur, estis tie, antaŭ la tabernaklo de la Eternulo; kaj
Salomono kaj la komunumo ĝin serĉis. **6** Kaj Salomono
supreniris tie antaŭ la Eternulo sur la kupran altaron,
kiu estis antaŭ la tabernaklo de kunveno, kaj alportis
sur ĝi mil bruloferojn. **7** En tiu nokto Dio aperis al
Salomono, kaj diris al li: Petu, kion Mi donu al vi. **8**
Kaj Salomono diris al Dio: Vi estis tre favorkora al
mia patro David, kaj Vi faris min reĝo anstataŭ li;
**9** nun, ho Dio Eternulo, plenumiĝu do Via vorto al
mia patro David. Ĉar Vi faris min reĝo super popolo
grandnombra kiel la polvo de la tero, **10** tial donu
al mi nun saĝecon kaj sciadon, por ke mi povosciu
eliradi kaj eniradi antaŭ tiu popolo; ĉar kiu povas
regi tiun Vian grandan popolon? **11** Tiam Dio diris al
Salomono: Pro tio, ke ĉi tio estis en via koro, kaj vi ne
petis riĉecon, nek havaĵojn, nek gloron, nek la animon
de viaj malamikoj, kaj eĉ longan vivon vi ne petis,
sed vi petis por vi saĝecon kaj sciadon, por regi Mian
popolon, super kiu Mi faris vin reĝo: **12** pro tio saĝeco
kaj sciado estas donataj al vi; sed ankaŭ riĉecon,
havaĵojn, kaj gloron Mi donos al vi en tia grado, kiun
ne havis la reĝoj antaŭ vi, kaj ankaŭ post vi oni tion ne
havos. **13** Kaj Salomono revenis de la altaĵo en Gibeon,
de la tabernaklo de kunveno, en Jerusalemon. Kaj li
reĝis super Izrael. **14** Kaj Salomono kolektis al si ĉarojn
kaj rajdistojn. Li havis mil kvarcent ĉarojn kaj dek du
mil rajdistojn; kaj li lokis ilin en la urboj de ĉaroj kaj
ĉe la reĝo en Jerusalem. **15** Kaj la reĝo atingis tion, ke
la arĝento kaj oro estis en Jerusalem kiel ŝtonoj, kaj la
cedroj estis en tiel granda kvanto, kiel la sikomoroj
sur la malaltaj lokoj. **16** La ĉevalojn al Salomono oni
venigadis el Egiptujo; kaj societo de komercistoj de
la reĝo aĉetadis ilin amase laŭ difinita prezo. **17** Ili
liveradis el Egiptujo ĉiun ĉaron pro sescent sikloj da
arĝento, kaj ĉiun ĉevalon pro cent kvindek; tiel same
ili estis liverataj per iliaj manoj al ĉiuj reĝoj de la
Ĥetidoj kaj al la reĝoj de Sirio.

**2** Kaj Salomono ordonis, ke oni konstruu domon
al la nomo de la Eternulo kaj reĝan domon
por li. **2** Salomono starigis sepdek mil portistojn,
okdek mil montajn ŝtonhakistojn, kaj tri mil sescent
kontrolistojn super ili. **3** Kaj Salomono sendis al
Ĥiram, reĝo de Tiro, por diri: Vi scias, kiel vi agis
kun mia patro David, kaj sendis al li cedran lignon,
por ke li konstruu al si domon, por loĝi en ĝi; **4** nun
jen mi konstruas domon al la nomo de la Eternulo,
mia Dio, por ke ĝi estu konsekrita al Li, por incensadi
antaŭ Li bonodorajn incensojn, prezenti tie konstante
panojn de propono, bruloferojn matene kaj vespere,
en sabatoj, monatkomencoj, kaj festoj de la Eternulo,
nia Dio, kio estas eterna leĝo por Izrael. **5** La domo,
kiun mi konstruas, estos granda; ĉar pli granda estas
nia Dio, ol ĉiuj dioj. **6** Kiu havus sufiĉe da fortoj,
por konstrui al Li domon? la ĉielo kaj la ĉielo de
ĉieloj ne povas ja Lin ampleksi. Kaj kiu mi estas, ke
mi konstruu al Li domon, kiu servus por io alia, ol
por nura incensado antaŭ Li? **7** Sendu do nun al mi
homon, kiu estas majstro en farado de objektoj el oro,
arĝento, kupro, fero, el ŝtofo purpura, ruĝa, kaj blua,
kaj kiu povoscias gravuri gravuraĵojn, kune kun la
artistoj, kiuj estas ĉe mi en Judujo kaj en Jerusalem
kaj kiujn mia patro David preparis. **8** Kaj sendu al
mi lignon cedran, cipresan, kaj santalan de Lebanon;
ĉar mi scias, ke viaj servantoj povoscias haki arbojn
Lebanonajn. Kaj jen miaj servantoj estos kun viaj, **9**
por pretigi por mi multe da ligno; ĉar la domo, kiun
mi konstruas, devas esti granda kaj mirinda. **10** Jen
por la ĉarpentistoj, por la lignohakistoj, viaj servantoj,
mi destinis dudek mil kor'ojn da draŝita tritiko, dudek
mil kor'ojn da hordeo, dudek mil bat'ojn da vino, kaj
dudek mil bat'ojn da oleo. **11** Ĥiram, reĝo de Tiro,
respondis per letero, kiun li sendis al Salomono: Pro
amo de la Eternulo al Sia popolo Li faris vin reĝo
super ĝi. **12** Kaj Ĥiram diris plue: Benata estu la
Eternulo, Dio de Izrael, kiu kreis la ĉielon kaj la teron,
kaj kiu donis al la reĝo David filon saĝan, kleran, kaj
ĉiokomprenan, kiu konstruos domon por la Eternulo
kaj reĝan domon por si. **13** Nun mi sendis homon
saĝan kaj kompetentan, mian majstron Ĥuram; **14** li

estas filo de virino el la idinoj de Dan, kaj lia patro
estis Tirano; li povoscias fari objektojn el oro, arĝento,
kupro, fero, ŝtono, kaj ligno, el ŝtofo purpura, blua,
bisina, kaj ruĝa, fari ĉiajn gravuraĵojn, kaj trovi bonajn
ideojn pri ĉio, kio estos komisiita al li, kune kun viaj
artistoj kaj kun la artistoj de mia sinjoro David, via
patro. **15** Nun la tritikon, hordeon, oleon, kaj vinon,
pri kiuj mia sinjoro parolis, li sendu al siaj servantoj;
**16** kaj ni hakos lignon de Lebanon, kiom vi bezonas,
kaj ni sendos ĝin al vi per flosoj sur la maro ĝis Jafo;
kaj vi venigos tion en Jerusalemon. **17** Kaj Salomono
kalkulis ĉiujn fremdulojn, kiuj estis en la lando de
Izrael post la kalkulo, kiun aranĝis lia patro David; kaj
troviĝis da ili cent kvindek tri mil sescent. **18** Kaj li
faris el ili sepdek mil portistojn, okdek mil montajn
ŝtonhakistojn, kaj tri mil sescent kontrolistojn, por
devigadi la popolon labori.

**3** Kaj Salomono komencis konstrui la domon de la
Eternulo en Jerusalem, sur la monto Morija, kiu
estis montrita al lia patro David, sur la loko, kiun
David pretigis, sur la loko de la draŝejo de Ornan, la
Jebusido. **2** Li komencis konstrui en la dua tago de
la dua monato, en la kvara jaro de sia reĝado. **3** Kaj
jene Salomono faris la fundamenton, por konstrui la
domon de Dio: la longo estis laŭ la antaŭa ulnomezuro
sesdek ulnoj, kaj la larĝo dudek ulnoj; **4** la portiko
laŭlonge de la domo havis simile al la larĝo de la
domo dudek ulnojn; la alto estis cent dudek. Kaj li
tegis ĝin interne per pura oro. **5** La grandan domon li
tabulkovris per ligno cipresa kaj tegis ĝin per pura oro
kaj faris sur ĝi palmornamojn kaj ĉenornamojn. **6** Kaj
li garnis la domon per multekostaj ŝtonoj por beleco;
la oro estis oro Parvaima. **7** Kaj li kovris la domon, la
trabojn, la sojlojn, ĝiajn murojn, kaj ĝiajn pordojn
per oro, kaj li skulptigis kerubojn sur la muroj. **8**
Kaj li faris la plejsanktejon; ĝia longo, konforme al
la larĝo de la domo, estis dudek ulnoj, kaj ĝia larĝo
estis dudek ulnoj; kaj li tegis ĝin per bona oro en
la kvanto de sescent kikaroj. **9** Por la najloj li donis
kvindek siklojn da oro; kaj la suprajn ĉambrojn li tegis
per oro. **10** Kaj en la plejsanktejo li faris du kerubojn
artiste faritajn kaj tegis ilin per oro. **11** La flugiloj
de la keruboj havis la longon de dudek ulnoj; unu
flugilo, havanta kvin ulnojn, tuŝiĝis kun la muro de la
domo, kaj la dua flugilo, havanta kvin ulnojn, tuŝiĝis
kun la flugilo de la dua kerubo. **12** Ankaŭ ĉe la dua
kerubo unu flugilo, havanta kvin ulnojn, tuŝiĝis kun
la muro de la domo, kaj la dua flugilo, havanta kvin
ulnojn, tuŝiĝis kun la flugilo de la alia kerubo. **13** La
flugiloj de tiuj keruboj estis etenditaj sur la spaco de
dudek ulnoj; ili staris sur siaj piedoj, kaj iliaj vizaĝoj
estis turnitaj al la domo. **14** Kaj li faris la kurtenon
el ŝtofo blua, purpura, kaj ruĝa, kaj el bisino; kaj li
faris sur ĝi kerubojn. **15** Kaj li faris antaŭ la domo du
kolonojn, havantajn la longon de tridek kvin ulnoj,
kaj la kapitelo supre havis kvin ulnojn. **16** Kaj li faris
ĉenojn en la plejsanktejo kaj metis ilin sur la supron
de la kolonoj; kaj li faris cent granatojn kaj metis ilin
sur la ĉenojn. **17** Kaj li starigis la kolonojn antaŭ la
templo, unu dekstre kaj unu maldekstre; al la dekstra
li donis la nomon Jaĥin, kaj al la maldekstra la nomon
Boaz.

**4** Kaj li faris kupran altaron, havantan la longon
de dudek ulnoj, la larĝon de dudek ulnoj, kaj la
alton de dek ulnoj. **2** Kaj li faris maron fanditan,
havantan dek ulnojn de rando ĝis rando, tute rondan,
havantan la alton de kvin ulnoj; kaj ŝnuro de tridek
ulnoj prezentis ĝian mezuron ĉirkaŭe. **3** Figuroj de
bovoj estis sub ĝi ĉirkaŭe, ĉiuflanke ĝin ĉirkaŭis; sur
la spaco de dek ulnoj ili ĉirkaŭis la maron, du vicoj da
bovoj, fanditaj samfande kun ĝi. **4** Ĝi staris sur dek
du bovoj: tri kun la vizaĝo norden, tri kun la vizaĝo
okcidenten, tri kun la vizaĝo suden, kaj tri kun la
vizaĝo orienten; kaj la maro estis sur ili supre; kaj
ĉiuj iliaj malantaŭaj partoj estis turnitaj internen. **5**
Ĝi havis la dikon de manlarĝo; kaj ĝia rando, farita
laŭ la maniero de rando de kaliko, estis simila al
disvolviĝinta lilio. Ĝi ampleksis tri mil bat'ojn. **6** Li
faris dek lavujojn kaj starigis kvin dekstre kaj kvin
maldekstre, por lavi en ili tion, kio estis preparata
por brulofero, por skulavi tion en ili; kaj la maro
estis, por ke la pastroj lavu sin en ĝi. **7** Kaj li faris
dek orajn kandelabrojn laŭ la preskribo koncerne
ilin, kaj starigis en la templo, kvin dekstre kaj kvin
maldekstre. **8** Li faris dek tablojn, kaj starigis en la
templo, kvin dekstre kaj kvin maldekstre. Li faris
ankaŭ cent orajn aspergajn kalikojn. **9** Li aranĝis la
korton de la pastroj kaj la grandan antaŭkorton kaj
pordojn por la antaŭkorto; kaj la pordojn li tegis
per kupro. **10** Kaj la maron li starigis sur la dekstra
flanko, oriente, en la suda parto. **11** Kaj Ĥuram faris la
kaldronojn kaj la ŝovelilojn kaj la aspergajn kalikojn.

Kaj Ĥuram finis la laboron, kiun li faris por la reĝo
Salomono en la domo de Dio: 12 du kolonojn, du
globaĵojn kaj kapitelojn sur la supro de la kolonoj,
du retojn por kovri la du globaĵojn de la kapiteloj,
kiuj estis sur la supro de la kolonoj, 13 kaj kvarcent
granatojn sur la du retoj, po du vicoj da granatoj por
ĉiu reto, por kovri la du globaĵojn de la kapiteloj,
kiuj estis sur la kolonoj. 14 Kaj li faris la bazaĵojn, kaj
la lavujojn li faris sur la bazaĵoj; 15 la unu maron,
kaj la dek du bovojn sub ĝi. 16 Kaj la kaldronojn, la
ŝovelilojn, kaj la forkojn, kaj ĉiujn iliajn vazojn faris
al Salomono lia majstro Ĥuram por la domo de la
Eternulo, el polurita kupro. 17 En la ĉirkaŭaĵo de
Jordan la reĝo fandigis ilin en argila tero, inter Sukot
kaj Cereda. 18 Kaj Salomono faris ĉiujn tiujn vazojn en
tre granda nombro, ĉar la pezo de la kupro ne estis
kalkulita. 19 Kaj Salomono faris ĉiujn vazojn, kiuj estas
en la domo de Dio: la oran altaron, la tablojn, sur
kiuj estas la panoj de propono; 20 la kandelabrojn kaj
iliajn lucernojn, por bruligi ilin laŭ la preskribo antaŭ
la plejsanktejo — el pura oro; 21 kaj la florojn kaj la
lucernojn kaj la prenilojn, el oro, tute el oro; 22 kaj la
tranĉilojn kaj la aspergajn kalikojn kaj la kulerojn kaj
la karbujojn, el pura oro; kaj la enirejo de la domo,
ĝiaj internaj pordoj al la plejsanktejo, kaj la pordoj de
la domo al la templo, estis oraj.

**5** Tiamaniere estis finita la tuta laboro, kiun Salomono
faris por la domo de la Eternulo. Kaj Salomono
enportis la konsekritaĵojn de sia patro David; la
arĝenton kaj la oron kaj ĉiujn vazojn li metis en la
trezorejojn de la domo de Dio. 2 Tiam Salomono
kunvenigis la plejaĝulojn de Izrael kaj ĉiujn ĉefojn de
la triboj, la estrojn de la patrodomoj de la Izraelidoj,
en Jerusalemon, por transporti la keston de interligo
de la Eternulo el la urbo de David, tio estas el Cion. 3
Kaj kolektiĝis al la reĝo ĉiuj Izraelidoj al la festo, tio
estas en la sepa monato. 4 Kaj venis ĉiuj plejaĝuloj
de Izrael; kaj la Levidoj ekportis la keston. 5 Kaj oni
enportis la keston kaj la tabernaklon de kunveno, kaj
ĉiujn sanktajn vazojn, kiuj estis en la tabernaklo; ilin
portis la pastroj Levidoj. 6 Kaj la reĝo Salomono, kaj
la tuta komunumo de Izrael, kiu kolektiĝis al li, estis
antaŭ la kesto, oferbuĉante ŝafojn kaj bovojn, kiujn oni
ne povis nombri nek kalkuli pro ilia granda multeco.
7 Kaj la pastroj venigis la keston de interligo de la
Eternulo sur ĝian lokon, en la profundon de la domo,
en la plejsanktejon, sub la flugilojn de la keruboj. 8 Ĉar
la keruboj havis siajn flugilojn etenditaj super la loko
de la kesto, kaj la keruboj estis kovrantaj la keston
kaj ĝiajn stangojn de supre. 9 Kaj la stangoj estis tiel
longaj, ke la kapetoj de la stangoj estis videblaj el la
kesto en la antaŭa parto de la plejsanktejo, sed ekstere
ili ne estis videblaj; kaj ili restis tie ĝis la nuna tago.
10 En la kesto estis nenio krom la du tabeloj, kiujn
metis tien Moseo sur Ĥoreb, kiam la Eternulo faris
interligon kun la Izraelidoj post ilia eliro el Egiptujo.
11 Kiam la pastroj eliris el la sanktejo (ĉar ĉiuj pastroj,
kiuj tie troviĝis, sanktiĝis, sen diferenco de la ordoj),
12 kaj la Levidoj-kantistoj — ili ĉiuj, Asaf, Heman,
Jedutun, iliaj filoj kaj fratoj — en bisinaj vestoj, kun
cimbaloj, psalteroj, kaj harpoj, staris oriente de la
altaro, kaj kun ili cent dudek pastroj, trumpetantaj per
trumpetoj; 13 kaj ili estis kvazaŭ unu, la trumpetantoj
kaj la kantantoj; kaj oni aŭdis kvazaŭ unu voĉon,
laŭdantan kaj dankantan antaŭ la Eternulo; kaj kiam
ektondris la voĉo de la trumpetoj kaj cimbaloj kaj
aliaj muzikaj instrumentoj, kaj de la glorkantado al la
Eternulo, ke Li estas bona kaj ke Lia favorkoreco estas
eterna: tiam la domo pleniĝis de nubo, la domo de
la Eternulo; 14 kaj la pastroj ne povis stari kaj servi
pro la nubo, ĉar la majesto de la Eternulo plenigis la
domon de Dio.

**6** Tiam Salomono ekparolis: La Eternulo diris, ke Li
deziras loĝi en mallumo; 2 tial mi konstruis domon
por Via loĝado, kaj lokon por Via restado eterna.
3 Kaj la reĝo turnis sian vizaĝon kaj benis la tutan
komunumon de Izrael; kaj la tuta komunumo de Izrael
staris. 4 Kaj li diris: Benata estu la Eternulo, Dio de
Izrael, kiu parolis per Sia buŝo al mia patro David,
kaj nun plenumis per Sia mano, dirante: 5 De post la
tago, kiam Mi elkondukis Mian popolon el la lando
Egipta, Mi elektis neniun urbon inter ĉiuj triboj de
Izrael, por konstrui domon, en kiu estus Mia nomo;
kaj Mi ne elektis homon, ke li estu reganto super Mia
popolo Izrael. 6 Sed Mi elektis Jerusalemon, ke Mia
nomo tie estu; kaj Mi elektis Davidon, ke li estu super
Mia popolo Izrael. 7 Mia patro David havis la intencon
konstrui domon al la nomo de la Eternulo, Dio de
Izrael. 8 Sed la Eternulo diris al mia patro David:
Intencante konstrui domon al Mia nomo, vi agis bone,
havante tian intencon; 9 tamen la domon konstruos
ne vi, sed nur via filo, kiu eliris el viaj lumboj, li

konstruos la domon al Mia nomo. 10 Kaj la Eternulo
plenumis Sian vorton, kiun Li diris: mi leviĝis anstataŭ
mia patro David kaj sidiĝis sur la trono de Izrael, kiel
diris la Eternulo, kaj mi konstruis la domon al la nomo
de la Eternulo, Dio de Izrael. 11 Kaj mi metis tien la
keston, en kiu troviĝas la interligo de la Eternulo,
kiun Li faris kun la Izraelidoj. 12 Kaj li stariĝis antaŭ
la altaro de la Eternulo kontraŭ la tuta komunumo de
Izrael, kaj li etendis siajn manojn 13 (ĉar Salomono
estis farinta kupran ambonon, havantan la longon de
kvin ulnoj, la larĝon de kvin ulnoj, kaj la alton de tri
ulnoj, kaj li estis lokinta ĝin meze de la antaŭkorto: li
nun stariĝis sur ĝi, ekgenuis antaŭ la tuta komunumo
de Izrael, etendis siajn manojn al la ĉielo), 14 kaj li
parolis: Ho Eternulo, Dio de Izrael! ne ekzistas dio
simila al Vi en la ĉielo nek sur la tero; Vi konservas la
interligon kaj la favorkorecon al Viaj servantoj, kiuj
iradas antaŭ Vi per sia tuta koro; 15 Vi plenumis al
Via servanto David, mia patro, kion Vi promesis al
li; Vi parolis per Via buŝo, kaj Vi plenumis per Via
mano, kiel ni nun vidas. 16 Nun, ho Eternulo, Dio
de Izrael, plenumu plue al Via servanto David, mia
patro, kion Vi promesis al li, dirante: Ne mankos ĉe
vi antaŭ Mi viro, sidanta sur la trono de Izrael, se
viaj filoj nur observados sian vojon, por iri laŭ Mia
instruo, kiel vi iradis antaŭ Mi. 17 Nun, ho Eternulo,
Dio de Izrael, veriĝu Via vorto, kiun Vi diris al Via
servanto David. 18 Ĉu efektive Dio loĝus kun homoj
sur la tero? ja la ĉielo kaj la ĉielo de ĉieloj ne povas
Vin ampleksi; des pli tion ne povas ĉi tiu domo, kiun
mi konstruis! 19 Sed turnu Vin al la preĝo de Via
servanto kaj al lia petego, ho Eternulo, mia Dio, por
aŭskulti la vokadon kaj la preĝon, per kiu Via servanto
preĝas antaŭ Vi, 20 por ke Viaj okuloj estu nefermitaj
super ĉi tiu domo tage kaj nokte, super la loko, pri
kiu Vi promesis, ke Vi estigos tie Vian nomon; por
aŭskulti la preĝon, kiun Via servanto faros sur ĉi tiu
loko. 21 Kaj aŭskultu la petegojn de Via servanto kaj
de Via popolo Izrael, per kiuj ili preĝos sur ĉi tiu loko;
aŭskultu el la loko de Via loĝado, el la ĉielo; kaj kiam
Vi aŭskultos, Vi pardonu. 22 Se iu pekos kontraŭ sia
proksimulo, kaj oni postulos de li ĵuron, ke li ĵuru, kaj
la ĵuro estos farata antaŭ Via altaro en ĉi tiu domo:
23 tiam aŭskultu el la ĉielo, kaj faru juĝon pri Viaj
servantoj, repagante al la malbonagulo, metante lian
konduton sur lian kapon, kaj elmontrante la pravecon
de virtulo, rekompencante lin laŭ lia virteco. 24 Se
Via popolo Izrael estos frapita de malamiko, pekinte
antaŭ Vi, sed ili returnos sin kaj gloros Vian nomon
kaj preĝos kaj petegos antaŭ Vi en ĉi tiu domo: 25
tiam aŭskultu el la ĉielo, kaj pardonu la pekon de Via
popolo Izrael, kaj revenigu ilin sur la teron, kiun Vi
donis al ili kaj al iliaj patroj. 26 Se la ĉielo ŝlosiĝos tiel,
ke ne estos pluvo pro tio, ke ili pekis antaŭ Vi, sed ili
ekpreĝos sur ĉi tiu loko kaj gloros Vian nomon kaj
returnos sin de sia peko, por ke Vi aŭskultu ilin: 27
tiam aŭskultu el la ĉielo, kaj pardonu la pekon de Viaj
servantoj kaj de Via popolo Izrael, montrante al ili
la bonan vojon, kiun ili devas iri; kaj donu pluvon
sur Vian landon, kiun Vi donis al Via popolo kiel
heredaĵon. 28 Se estos malsato en la lando, aŭ se estos
pesto, brulsekeco, velkado, akridoj, aŭ vermoj, aŭ se
premos ilin malamiko en la lando de ilia loĝado, aŭ
se estos ia plago aŭ malsano; 29 ĉe ĉiu preĝo, ĉe ĉiu
petego, kiun faros iu homo aŭ Via tuta popolo Izrael,
kiam ĉiu el ili sentos sian malfeliĉon kaj sian doloron
kaj etendos siajn manojn al ĉi tiu domo: 30 aŭskultu
el la ĉielo, el la loko de Via loĝado, kaj pardonu, kaj
redonu al ĉiu konforme al lia tuta konduto, kiel Vi
konas lian koron (ĉar Vi sola konas la koron de la
homidoj); 31 por ke ili Vin timu, kaj por ke ili iradu
laŭ Viaj vojoj dum la tuta tempo, kiun ili vivas sur la
tero, kiun Vi donis al niaj patroj. 32 Ankaŭ koncerne
aligentulon, kiu ne estas el Via popolo Izrael, sed
venos el malproksima lando pro Via granda nomo,
pro Via forta mano, kaj pro Via etendita brako, kaj li
venos kaj preĝos en ĉi tiu domo: 33 Vi aŭskultu el
la ĉielo, el la loko de Via loĝado, kaj faru ĉion, pri
kio vokos al Vi la aligentulo; por ke ĉiuj popoloj de
la tero konu Vian nomon, kaj timu Vin tiel, kiel Via
popolo Izrael, kaj por ke ili sciu, ke per Via nomo
estas nomata ĉi tiu domo, kiun mi konstruis. 34 Kiam
Via popolo eliros milite kontraŭ siajn malamikojn
laŭ la vojo, laŭ kiu Vi ilin sendos, kaj ili preĝos al
Vi, turninte sin al ĉi tiu urbo, kiun Vi elektis, kaj
al la domo, kiun mi konstruis al Via nomo: 35 tiam
aŭskultu el la ĉielo ilian preĝon kaj ilian petegon, kaj
defendu ilian aferon. 36 Se ili pekos antaŭ Vi (ĉar
ne ekzistas homo, kiu ne pekus), kaj Vi ekkoleros
kontraŭ ili kaj transdonos ilin al malamiko, kaj iliaj
kaptintoj forkondukos ilin en landon malproksiman
aŭ proksiman; 37 sed ili rekonsciiĝos en la lando, en
kiu ili estos kaptitaj, konvertiĝos, kaj petegos Vin
en la lando de sia kaptiteco, dirante: Ni pekis, ni

malbonagis, ni krimis; 38 kaj ili returnos sin al Vi per
sia tuta koro kaj per sia tuta animo en la lando de sia
kaptiteco, kien oni forkondukis ilin, kaj ili preĝos,
turninte sin al sia lando, kiun Vi donis al iliaj patroj,
kaj al la urbo, kiun Vi elektis, kaj al la domo, kiun mi
konstruis al Via nomo: 39 tiam aŭskultu el la ĉielo, el
la loko de Via loĝado, ilian preĝon kaj ilian petegon,
defendu ilian aferon, kaj pardonu al Via popolo tion,
per kio ili pekis antaŭ Vi. 40 Nun, ho mia Dio, Viaj
okuloj estu nefermitaj kaj Viaj oreloj estu atentaj al
la preĝo sur ĉi tiu loko. 41 Kaj nun leviĝu, ho Dio
Eternulo, en Vian ripozejon, Vi kaj la arkeo de Via
potenco. Viaj pastroj, ho Dio Eternulo, vestiĝu per
savo, kaj Viaj fideluloj ĝuu bonon. 42 Ho Dio Eternulo,
ne forturnu la vizaĝon de Via sanktoleito; memoru la
favorkorecon koncerne Davidon, Vian servanton.

**7** Kiam Salomono finis la preĝadon, malleviĝis fajro
el la ĉielo kaj forbruligis la bruloferon kaj la aliajn
oferojn; kaj la majesto de la Eternulo plenigis la
domon. 2 Kaj la pastroj ne povis eniri en la domon de
la Eternulo, ĉar la majesto de la Eternulo plenigis la
domon de la Eternulo. 3 Kaj ĉiuj Izraelidoj vidis, kiel
la fajro kaj la majesto de la Eternulo malleviĝis sur
la domon, kaj ili ekgenuis vizaĝaltere sur la pavimo,
adorkliniĝis, kaj dankis la Eternulon, ke Li estas bona,
ke eterna estas Lia favorkoreco. 4 Kaj la reĝo kaj la
tuta popolo faris oferojn antaŭ la Eternulo. 5 La reĝo
Salomono oferis dudek du mil bovojn kaj cent dudek
mil ŝafojn. Tiamaniere la reĝo kaj la tuta popolo
inaŭguris la domon de Dio. 6 La pastroj staris sur siaj
postenoj, kaj la Levidoj kun la muzikaj instrumentoj
por la Eternulo, kiujn faris la reĝo David, por kanti
dankon al la Eternulo, ke eterna estas Lia favorkoreco,
per la laŭdkantoj de David; kaj la pastroj trumpetis
apud ili, kaj ĉiuj Izraelidoj staris. 7 Kaj Salomono
sanktigis la mezon de la korto, kiu estis antaŭ la
domo de la Eternulo; ĉar li faris tie la bruloferojn kaj
alportis ofere la sebon de la pacoferoj; ĉar la kupra
altaro, kiun Salomono faris, ne povis plene loki sur
si la bruloferon, la farunoferon, kaj la sebon. 8 Kaj
Salomono faris tiam feston dum sep tagoj, kaj kun
li la tuta Izrael, tre granda anaro, kiu kunvenis de
Ĥamat ĝis la torento de Egiptujo. 9 Kaj en la oka tago
ili faris festofermon, ĉar la inaŭguron de la altaro ili
faris dum sep tagoj kaj la feston dum sep tagoj. 10 En
la dudek-tria tago de la sepa monato li forsendis la
popolon al ĝiaj tendoj, gajan kaj ĝojantan pro la bono,
kiun la Eternulo faris al David, al Salomono, kaj al
Sia popolo Izrael. 11 Tiamaniere Salomono sukcese
finis la domon de la Eternulo kaj la reĝan domon, kaj
ĉion, kion Salomono en sia koro faris en la domo de la
Eternulo kaj en sia domo. 12 Kaj la Eternulo aperis al
Salomono en la nokto, kaj diris al li: Mi aŭdis vian
preĝon, kaj Mi elektis al Mi ĉi tiun lokon kiel domon
de oferoj. 13 Se Mi ŝlosos la ĉielon tiel, ke ne estos
pluvo, aŭ se Mi ordonos al la lokustoj primanĝi la
teron, aŭ se Mi sendos peston sur Mian popolon, 14
sed Mia popolo, kiu portas Mian nomon, humiliĝos
kaj preĝos kaj serĉos Mian vizaĝon kaj returnos sin de
siaj malbonaj vojoj: tiam Mi aŭskultos el la ĉielo, kaj
pardonos ilian pekon kaj resanigos ilian landon. 15
Nun Miaj okuloj estos nefermitaj kaj Miaj oreloj estos
atentaj al preĝo sur ĉi tiu loko. 16 Nun Mi elektis kaj
sanktigis ĉi tiun domon, por ke Mia nomo estu tie
eterne; kaj Miaj okuloj kaj Mia koro estos tie ĉiutempe.
17 Kaj se vi irados antaŭ Mi tiel, kiel iradis via patro
David, kaj vi agados konforme al ĉio, kion Mi ordonis
al vi, kaj vi observados Miajn leĝojn kaj preskribojn:
18 tiam Mi fortikigos la tronon de via regno, kiel Mi
promesis al via patro David, dirante: Ne mankos ĉe vi
viro, reganta super Izrael. 19 Sed se vi deturnos vin,
kaj forlasos Miajn leĝojn kaj Miajn ordonojn, kiujn
Mi donis al vi, kaj vi iros kaj servos al aliaj dioj kaj
adorkliniĝos antaŭ ili: 20 tiam Mi elŝiros ilin el Mia
lando, kiun Mi donis al ili; kaj ĉi tiun domon, kiun
Mi sanktigis por Mia nomo, Mi forpuŝos de antaŭ
Mia vizaĝo, kaj Mi faros ĝin proverbo kaj mokataĵo
inter ĉiuj popoloj. 21 Kaj pri ĉi tiu domo, kiu estas
tre alta, ĉiu preteriranto miregos, kaj diros: Pro kio
la Eternulo agis tiele kun ĉi tiu lando kaj kun ĉi tiu
domo? 22 Kaj oni respondos: Pro tio, ke ili forlasis la
Eternulon, Dion de siaj patroj, kiu elkondukis ilin el la
lando Egipta, kaj ili aliĝis al aliaj dioj kaj adorkliniĝis
antaŭ ili kaj servis al ili — pro tio Li venigis sur ilin ĉi
tiun tutan malbonon.

**8** Post paso de la dudek jaroj, dum kiuj Salomono
konstruis la domon de la Eternulo kaj sian domon,
2 kaj post kiam Salomono konstruis ankaŭ la urbojn,
kiujn Ĥiram donis al Salomono, kaj li enloĝigis tie la
Izraelidojn, 3 Salomono iris kontraŭ Ĥamat-Coban kaj
venkoprenis ĝin. 4 Kaj li konstruis Tadmoron en la
dezerto, kaj ĉiujn urbojn de provizoj, kiujn li konstruis

en Ĥamat. 5 Li ankaŭ konstruis Bet-Ĥoronon la supran
kaj Bet-Ĥoronon la malsupran, urbojn fortikigitajn
kun muregoj, pordoj, kaj rigliloj, 6 kaj Baalaton, kaj
ĉiujn urbojn de provizoj, kiujn Salomono havis, kaj
ĉiujn urbojn por la ĉaroj kaj la urbojn por la rajdistoj,
kaj ĉion, kion Salomono deziris konstrui en Jerusalem
kaj sur Lebanon kaj en la tuta lando de sia regado. 7
Koncerne la tutan popolon, kiu restis el la Ĥetidoj,
Amoridoj, Perizidoj, Ĥividoj, kaj Jebusidoj, kiuj ne estis
el la Izraelidoj: 8 el iliaj infanoj, kiuj restis post ili en
la lando kaj kiujn la Izraelidoj ne ekstermis, Salomono
faris tributulojn ĝis la nuna tago. 9 Sed el la Izraelidoj
Salomono ne faris servantojn por liaj laboroj, ĉar ili
estis militistoj, estroj de liaj korpogardistoj, estroj
super liaj ĉaroj kaj super liaj rajdistoj. 10 La nombro
de la ĉefaj oficistoj, kiujn havis la reĝo Salomono, estis
ducent kvindek. 11 La filinon de Faraono elkondukis
Salomono el la urbo de David en la domon, kiun li
konstruis por ŝi; ĉar li diris: Virino ne devas loĝi ĉe
mi en la domo de David, reĝo de Izrael, ĉar ĝi estas
sankta pro tio, ke en ĝin eniris la kesto de la Eternulo.
12 Tiam Salomono komencis alportadi bruloferojn al
la Eternulo sur tiun altaron de la Eternulo, kiun li
konstruis antaŭ la portiko, 13 por oferadi laŭ la ordo
de ĉiu tago, konforme al la ordono de Moseo pri la
sabatoj, la monatkomencoj, kaj la festoj, kiuj estis tri
fojojn en jaro, Pasko, Pentekosto, kaj festo de laŭboj.
14 Kaj li starigis, konforme al la preskribo de sia patro
David, la partiojn de la pastroj por ilia servado, kaj la
Levidojn por iliaj postenoj, por ke ili glorkantu kaj
servu apud la pastroj laŭ la ordo de ĉiu tago, ankaŭ
la pordegistojn laŭ iliaj grupoj por ĉiu pordego; ĉar
tia estis la ordono de David, la homo de Dio. 15 Kaj
oni en nenio dekliniĝis de la ordono de la reĝo pri la
pastroj kaj Levidoj kaj pri la trezoroj. 16 Tiele estis
aranĝita la tuta laboro de Salomono de post la tago,
kiam estis fondita la domo de la Eternulo, ĝis la domo
de la Eternulo estis tuta preta. 17 Tiam Salomono iris
en Ecjon-Geberon kaj en Elaton, sur la bordo de la
maro, en la lando de Edom. 18 Kaj Ĥiram sendis al li
per siaj servantoj ŝipojn, kaj servistojn, kiuj konis la
maron; kaj ili veturis kun la servantoj de Salomono en
Ofiron, kaj prenis de tie kvarcent kvindek kikarojn da
oro kaj venigis al la reĝo Salomono.

9 Kiam la reĝino de Ŝeba aŭdis la famon pri Salomono,
ŝi venis, por elprovi Salomonon per enigmoj,
en Jerusalemon, kun tre granda akompanantaro,
kun kameloj, portantaj aromaĵojn, multe da oro, kaj
multekostajn ŝtonojn. Kaj ŝi venis al Salomono, kaj
parolis kun li pri ĉio, kion ŝi havis sur sia koro. 2
Kaj Salomono solvis al ŝi ĉiujn ŝiajn demandojn; kaj
estis nenio, kion Salomono ne scius kaj kion li ne
solvus al ŝi. 3 Kaj la reĝino de Ŝeba vidis la saĝecon de
Salomono, kaj la domon, kiun li konstruis, 4 kaj la
manĝaĵon de lia tablo kaj la loĝejon de liaj sklavoj
kaj la oficojn de liaj servantoj kaj iliajn vestojn, liajn
vinverŝistojn kaj iliajn vestojn, kaj lian iradon, kiam
li iris en la domon de la Eternulo; kaj ŝi estis tute
ravita. 5 Kaj ŝi diris al la reĝo: Vera estas tio, kion mi
aŭdis en mia lando pri viaj aferoj kaj pri via saĝeco; 6
mi ne kredis iliajn vortojn, ĝis mi venis kaj ĝis miaj
okuloj ekvidis; sed nun mi vidas, ke oni ne rakontis
al mi eĉ duonon de via granda saĝeco: vi superas la
famon, kiun mi aŭdis. 7 Feliĉaj estas viaj homoj, kaj
feliĉaj estas viaj servantoj, kiuj ĉiam staras antaŭ vi
kaj aŭdas vian saĝecon. 8 Benata estu la Eternulo,
via Dio, kiu favoras vin kaj sidigis vin sur via trono
kiel reĝon antaŭ la Eternulo, via Dio. Pro amo de
via Dio al la Izraelidoj, por fortikigi ilin por ĉiam, Li
faris vin reĝo super ili, por ke vi zorgu pri juĝo kaj
justeco. 9 Kaj ŝi donacis al la reĝo cent dudek kikarojn
da oro kaj tre multe da aromaĵoj kaj multekostajn
ŝtonojn; neniam estis aromaĵoj similaj al tiuj, kiujn la
reĝino de Ŝeba donacis al la reĝo Salomono. 10 Kaj la
servantoj de Ĥiram kaj la servantoj de Salomono, kiuj
venigis oron el Ofir, venigis ankaŭ santalan lignon
kaj multekostajn ŝtonojn. 11 Kaj el la santala ligno la
reĝo faris ŝtuparojn por la domo de la Eternulo kaj
por la reĝa domo, ankaŭ harpojn kaj psalterojn por la
kantistoj; neniam antaŭe oni vidis ion similan en la
Juda lando. 12 Kaj la reĝo Salomono donis al la reĝino
de Ŝeba ĉion, kion ŝi deziris kaj kion ŝi petis, krom
tio, kion ŝi alportis al la reĝo. Kaj ŝi foriris returne
en sian landon, ŝi kaj ŝiaj servantoj. 13 La pezo de la
oro, kiu estis alportita al Salomono dum unu jaro,
estis sescent sesdek ses kikaroj da oro; 14 krom tio
la disportistoj kaj komercistoj alportadis, kaj ankaŭ
ĉiuj reĝoj de Arabujo kaj la regionestroj alportadis al
Salomono oron kaj arĝenton. 15 Kaj la reĝo Salomono
faris ducent grandajn ŝildojn el forĝita oro (sescent
sikloj da forĝita oro estis uzitaj por ĉiu ŝildo), 16 kaj
tricent malgrandajn ŝildojn el forĝita oro (tricent
sikloj da oro estis uzitaj por ĉiu el tiuj ŝildoj), kaj

la reĝo metis ilin en la arbardomon de Lebanon. 17
Kaj la reĝo faris grandan tronon el eburo kaj tegis
ĝin per pura oro. 18 Kaj ses ŝtupojn havis la trono,
kaj oran piedbenketon, alfortikigitajn al la trono,
kaj brakapogojn ambaŭflanke de la sidloko, kaj du
leonojn, starantajn apud la brakapogoj. 19 Kaj ankoraŭ
dek du leonoj tie staris sur la ses ŝtupoj ambaŭflanke;
io simila ne ekzistis en iu regno. 20 Kaj ĉiuj trinkvazoj
de la reĝo Salomono estis el oro, kaj ĉiuj vazoj de la
Lebanona arbardomo estis el pura oro; arĝento en la
tempo de Salomono estis rigardata kiel senvalora.
21 Ĉar la reĝo havis ŝipojn, kiuj iradis en Tarŝiŝon
kun la servantoj de Ĥiram; unu fojon en tri jaroj
venadis la ŝipoj el Tarŝiŝ, alportante oron, arĝenton,
eburon, simiojn, kaj pavojn. 22 Tiel la reĝo Salomono
superis ĉiujn reĝojn de la tero per riĉeco kaj saĝeco.
23 Kaj ĉiuj reĝoj de la tero penis vidi Salomonon, por
aŭdi lian saĝecon, kiun Dio enmetis en lian koron. 24
Kaj ili alportadis ĉiu sian donacon: vazojn arĝentajn,
vazojn orajn, vestojn, batalilojn, aromaĵojn, ĉevalojn,
kaj mulojn, ĉiujare. 25 Kaj Salomono havis kvar mil
ĉevalstalojn, ĉarojn, kaj dek du mil rajdistojn; kaj
li lokis ilin en la urboj de ĉaroj kaj ĉe la reĝo en
Jerusalem. 26 Li regis super ĉiuj reĝoj, de la Rivero ĝis
la lando Filiŝta kaj ĝis la limo de Egiptujo. 27 Kaj la
reĝo atingis tion, ke la arĝento en Jerusalem estis kiel
ŝtonoj, kaj la cedroj estis en tiel granda kvanto, kiel
sikomoroj sur malaltaj lokoj. 28 Ĉevalojn oni venigadis
al Salomono el Egiptujo kaj el ĉiuj landoj. 29 La tuta
cetera historio de Salomono, la unua kaj la lasta,
estas priskribita en la kroniko de la profeto Natan,
en la profetaĵoj de Aĥija, la Ŝiloano, kaj en la vizioj
de Jedo, la viziisto, pri Jerobeam, filo de Nebat. 30
Kaj Salomono reĝis en Jerusalem super la tuta Izrael
kvardek jarojn. 31 Kaj Salomono ekdormis kun siaj
patroj, kaj oni enterigis lin en la urbo de lia patro
David. Kaj anstataŭ li ekreĝis Reĥabeam, lia filo.

**10** Reĥabeam iris en Ŝeĥemon, ĉar en Ŝeĥemon
venis ĉiuj Izraelidoj, por fari lin reĝo. 2 Kiam tion
aŭdis Jerobeam, filo de Nebat (ĉar li estis en Egiptujo,
kien li forkuris de la reĝo Salomono), Jerobeam
revenis el Egiptujo. 3 Kaj oni sendis, kaj vokis lin.
Tiam venis Jerobeam kaj la tuta Izrael, kaj ili ekparolis
al Reĥabeam, dirante: 4 Via patro tro pezigis nian
jugon; nun deprenu iom de la malfacilaj laboroj de
via patro, kaj de lia peza jugo, kiun li metis sur nin,
kaj tiam ni servados al vi. 5 Kaj li diris al ili: Post tri
tagoj revenu al mi. Kaj la popolo disiris. 6 Kaj la reĝo
Reĥabeam konsiliĝis kun la maljunuloj, kiuj staradis
antaŭ lia patro Salomono dum lia vivo, kaj li diris:
Kiel vi konsilas respondi al ĉi tiu popolo? 7 Kaj ili diris
al li jene: Se vi estos bona al ĉi tiu popolo kaj montros
al ili favoron kaj parolos al ili bonajn vortojn, ili estos
al vi servantoj por ĉiam. 8 Sed li ne atentis la konsilon
de la maljunuloj, kiun ili donis al li; kaj li konsiliĝis
kun la junuloj, kiuj elkreskis kune kun li kaj staris
antaŭ li. 9 Kaj li diris al ili: Kion vi konsilas, ke ni
respondu al ĉi tiu popolo, kiu diris al mi jene: Faru
malpli peza la jugon, kiun via patro metis sur nin?
10 Kaj la junuloj, kiuj elkreskis kune kun li, parolis
al li, dirante: Tiele diru al la popolo, kiu diris al vi:
Via patro faris nian jugon tro peza, kaj vi faru ĝin
malpli peza — tiele diru al ili: Mia malgranda fingro
estas pli dika, ol la lumboj de mia patro; 11 tial se
mia patro ŝarĝis vin per peza jugo, mi ankoraŭ pli
pezigos vian jugon; mia patro vin punadis per vipoj,
sed mi vin punados per skorpioj. 12 Kaj Jerobeam kaj
la tuta popolo venis al Reĥabeam en la tria tago, kiel
la reĝo ordonis, dirante: Revenu al mi en la tria tago.
13 Kaj la reĝo respondis al ili malafable; kaj la reĝo
Reĥabeam ne atentis la konsilon de la maljunuloj; 14
kaj li parolis al ili laŭ la konsilo de la junuloj, dirante:
Mia patro pezigis vian jugon, sed mi ĝin ankoraŭ
pli pezigos; mia patro vin punadis per vipoj, sed mi
vin punados per skorpioj. 15 Kaj la reĝo ne aŭskultis
la popolon; ĉar estis tiel destinite de Dio, por ke la
Eternulo plenumu Sian vorton, kiun Li diris per Aĥija,
la Ŝiloano, al Jerobeam, filo de Nebat. 16 Kiam ĉiuj
Izraelidoj vidis, ke la reĝo ilin ne obeas, tiam la popolo
respondis al la reĝo, dirante: Kian parton ni havas en
David? ni ne havas heredaĵon en la filo de Jiŝaj; iru,
ho Izraelidoj, ĉiu al sia tendo! nun zorgu mem pri
via domo, ho David! Kaj ĉiuj Izraelidoj disiris al siaj
tendoj. 17 Sed super la Izraelidoj, kiuj loĝis en la urboj
de Judujo, regis Reĥabeam. 18 Kaj la reĝo Reĥabeam
sendis Hadoramon, la estron super la impostoj; sed
la Izraelidoj ĵetis sur lin ŝtonojn, kaj li mortis. Kaj la
reĝo Reĥabeam rapide sidiĝis en ĉaro, por forkuri en
Jerusalemon. 19 Tiamaniere Izrael defalis de la domo
de David ĝis la nuna tago.

**11** Kiam Reĥabeam venis en Jerusalemon, li kolektis
el la domo de Jehuda kaj de Benjamen cent okdek

mil elektitajn militistojn, por militi kontraŭ Izrael, por
revenigi la regnon al Reĥabeam. 2 Sed aperis vorto de
la Eternulo al Ŝemaja, homo de Dio, dirante: 3 Diru al
Reĥabeam, filo de Salomono, reĝo de Judujo, kaj al ĉiuj
Izraelidoj en la lando de Jehuda kaj de Benjamen jene:
4 Tiele diras la Eternulo: Ne iru kaj ne militu kontraŭ
viaj fratoj; reiru ĉiu al sia domo, ĉar de Mi estas farita
ĉi tiu afero. Kaj ili obeis la vortojn de la Eternulo,
kaj rifuzis iri kontraŭ Jerobeamon. 5 Reĥabeam loĝis
en Jerusalem, kaj li konstruis fortikaĵojn en la urboj
de Judujo. 6 Li prikonstruis Bet-Leĥemon, Etamon,
Tekoan, 7 Bet-Curon, Soĥon, Adulamon, 8 Gaton,
Mareŝan, Zifon, 9 Adoraimon, Laĥiŝon, Azekan, 10
Corean, Ajalonon, kaj Ĥebronon, kiuj estis urboj
fortikigitaj en la lando de Jehuda kaj de Benjamen.
11 Li fortigis tiujn fortikaĵojn kaj starigis tie estrojn,
aranĝis provizejojn de manĝaĵoj, oleo, kaj vino. 12
Kaj en ĉiu urbo li kolektis ŝildojn kaj lancojn, kaj tre
fortigis ilin. Kaj Jehuda kaj Benjamen restis liaj. 13
La pastroj kaj Levidoj, kiuj estis en la tuta lando de
Izrael, kolektiĝis al li el ĉiuj siaj regionoj; 14 la Levidoj
forlasis siajn antaŭurbojn kaj sian posedaĵon kaj iris
en Judujon kaj Jerusalemon, ĉar Jerobeam kaj liaj
filoj forpuŝis ilin de la pastrado al la Eternulo. 15
Li starigis ĉe si pastrojn por la altaĵoj, por la kaproj
kaj bovidoj, kiujn li faris. 16 Post ili el ĉiuj triboj de
Izrael tiuj homoj, kiuj havis la inklinon turnadi sin al
la Eternulo, Dio de Izrael, venadis en Jerusalemon,
por fari oferojn al la Eternulo, Dio de iliaj patroj. 17
Kaj ili fortigadis la regnon de Judujo, kaj subtenadis
Reĥabeamon, filon de Salomono, dum tri jaroj; ĉar ili
iradis laŭ la vojo de David kaj Salomono dum tri jaroj.
18 Reĥabeam prenis al si kiel edzinon Maĥalaton,
filinon de Jerimot, filo de David, kaj de Abiĥail, filino
de Eliab, filo de Jiŝaj. 19 Ŝi naskis al li filojn: Jeuŝ,
Ŝemarja, kaj Zaham. 20 Post ŝi li prenis Maaĥan,
filinon de Abŝalom; kaj ŝi naskis al li Abijan, Atajon,
Zizan, kaj Ŝelomiton. 21 Reĥabeam amis Maaĥan,
filinon de Abŝalom, pli ol ĉiujn siajn edzinojn kaj
kromvirinojn; ĉar li havis dek ok edzinojn kaj sesdek
kromvirinojn, kaj li naskigis dudek ok filojn kaj sesdek
filinojn. 22 Reĥabeam starigis Abijan, filon de Maaĥa,
kiel ĉefon, kiel princon inter liaj fratoj, intencante fari
lin reĝo. 23 Li agadis prudente; li dissendis ĉiujn siajn
filojn en ĉiujn regionojn de Jehuda kaj de Benjamen,
en ĉiujn fortikigitajn urbojn; li donis al ili grandajn
vivrimedojn kaj prenis por ili multe da edzinoj.

12 Kiam fortikiĝis la regno de Reĥabeam kaj li fariĝis
forta, li forlasis la instruon de la Eternulo, kaj kun
li la tuta Izrael. 2 En la kvina jaro de la reĝo Reĥabeam
iris Ŝiŝak, reĝo de Egiptujo, kontraŭ Jerusalemon (ĉar
ili pekis kontraŭ la Eternulo) 3 kun mil ducent ĉaroj
kaj sesdek mil rajdistoj; sennombra estis la popolo, kiu
venis kun li el Egiptujo: la Luboj, Sukioj, kaj Etiopoj. 4
Kaj li venkoprenis la fortikigitajn urbojn de Judujo
kaj aliris ĝis Jerusalem. 5 Tiam la profeto Ŝemaja
venis al Reĥabeam, kaj al la estroj de Judujo, kiuj
kolektiĝis en Jerusalem pro Ŝiŝak, kaj li diris al ili:
Tiele diras la Eternulo: Vi forlasis Min, tial ankaŭ Mi
forlasas vin en la manojn de Ŝiŝak. 6 Tiam humiliĝis
la estroj de Izrael kaj la reĝo, kaj diris: Justa estas la
Eternulo. 7 Kiam la Eternulo vidis, ke ili humiliĝis,
tiam aperis vorto de la Eternulo al Ŝemaja, dirante:
Ili humiliĝis, tial Mi ne ekstermos ilin; Mi donos
al ili iom da savo, kaj Mia kolero ne elverŝiĝos sur
Jerusalemon per Ŝiŝak; 8 tamen ili estos liaj subuloj,
por ke ili eksciu, kio estas servado al Mi kaj servado al
teraj regnoj. 9 Kaj Ŝiŝak, reĝo de Egiptujo, iris kontraŭ
Jerusalemon, kaj li forprenis la trezorojn de la domo
de la Eternulo kaj la trezorojn de la reĝa domo, ĉion
li prenis; li prenis ankaŭ la orajn ŝildojn, kiujn faris
Salomono. 10 Kaj la reĝo Reĥabeam faris anstataŭ ili
ŝildojn kuprajn, kaj transdonis ilin en la manojn de la
estroj de korpogardistoj, kiuj gardadis la enirejon de
la reĝa domo. 11 Kaj ĉiufoje, kiam la reĝo iris en la
domon de la Eternulo, venis la korpogardistoj, portis
ilin, kaj poste returne portis ilin en la ĉambron de la
korpogardistoj. 12 Kiam li humiliĝis, tiam deturniĝis
de li la kolero de la Eternulo, kaj ne ĉio pereis; ĉar en
Judujo estis ankoraŭ io bona. 13 La reĝo Reĥabeam
fortikiĝis en Jerusalem, kaj li reĝis. La aĝon de kvardek
unu jaroj havis Reĥabeam, kiam li fariĝis reĝo; kaj dek
sep jarojn li reĝis en Jerusalem, la urbo, kiun elektis
la Eternulo inter ĉiuj triboj de Izrael, por estigi tie
Sian nomon. La nomo de lia patrino estis Naama, la
Amonidino. 14 Li agis malbone, ĉar li ne alkutimigis
sian koron al serĉado de la Eternulo. 15 La historio de
Reĥabeam, la unua kaj la lasta, estas priskribita en la
kronikoj de la profeto Ŝemaja kaj de la viziisto Ido, ĉe
la genealogio. Kaj inter Reĥabeam kaj Jerobeam estis
militoj dum ilia tuta vivo. 16 Kaj Reĥabeam ekdormis
kun siaj patroj, kaj oni enterigis lin en la urbo de
David. Kaj anstataŭ li ekreĝis lia filo Abija.

**13** En la dek-oka jaro de la reĝo Jerobeam ekreĝis
Abija super Judujo. **2** Tri jarojn li reĝis en
Jerusalem. La nomo de lia patrino estis Miĥaja,
filino de Uriel, el Gibea. Milito estis inter Abija kaj
Jerobeam. **3** Abija eliris en la militon kun anaro da
bonaj militistoj, konsistanta el kvarcent mil viroj
elektitaj; Jerobeam eliris en la militon kontraŭ li kun
okcent mil viroj elektitaj, bonaj militistoj. **4** Abija
stariĝis supre sur la monto Cemaraim, kiu estas en
la montaro de Efraim, kaj diris: Aŭskultu min, ho
Jerobeam kaj la tuta Izrael! **5** Vi devas ja scii, ke
la Eternulo, Dio de Izrael, donis la reĝadon super
Izrael por ĉiam al David, al li kaj al liaj filoj, per
interligo de salo. **6** Sed leviĝis Jerobeam, filo de
Nebat, servanto de Salomono, filo de David, kaj ribelis
kontraŭ sia sinjoro. **7** Kaj kolektiĝis ĉirkaŭ li homoj
vantaj, homoj malvirtaj, kaj superfortis Reĥabeamon,
filon de Salomono; Reĥabeam estis juna kaj molkora
kaj ne povis rezisti al ili. **8** Kaj nun vi pensas, ke vi
havos forton kontraŭ la regno de la Eternulo en la
mano de la filoj de David, ĉar vi prezentas grandan
amason, kaj vi havas orajn bovidojn, kiujn Jerobeam
faris dioj por vi. **9** Vi elpuŝis ja la pastrojn de la
Eternulo, la Aaronidojn kaj Levidojn, kaj vi faris al
vi pastrojn kiel la popoloj de la aliaj landoj; ĉiu,
kiu venas por sia konsekrado kun bovo kaj kun sep
ŝafoj, fariĝas pastro por la nedioj. **10** Sed kun ni
estas la Eternulo, nia Dio; ni ne forlasis Lin; kaj al
la Eternulo servas pastroj Aaronidoj kaj Levidoj laŭ
ilia ofico, **11** kaj ili bruligas al la Eternulo bruloferojn
ĉiumatene kaj ĉiuvespere, kaj incensan aromaĵon,
kaj ili aranĝas panon sur pura tablo, kaj la oran
kandelabron kun ĝiaj lucernoj, ke ili brulu ĉiuvespere;
ĉar ni plenumas la preskribon de la Eternulo, nia Dio,
kaj vi forlasis Lin. **12** Vidu, kun ni, kiel nia ĉefo, estas
Dio, kaj ankaŭ Liaj pastroj kaj laŭtesonaj trumpetoj,
por trumpetegi kontraŭ vi. Ho Izraelidoj, ne militu
kontraŭ la Eternulo, Dio de viaj patroj, ĉar vi ne havos
sukceson. **13** Dume Jerobeam ĉirkaŭirigis embuskon,
kiu aperis malantaŭ ili; tiamaniere estis militistoj
antaŭ la Judoj kaj embusko malantaŭ ili. **14** La Judoj
sin returnis, kaj ekvidis, ke ili havas batalon antaŭe
kaj malantaŭe. Tiam ili ekkriis al la Eternulo, kaj la
pastroj ektrumpetis per la trumpetoj. **15** Kaj la Judoj
laŭte ekbruis; kaj kiam la Judoj ekbruis, Dio frapis
Jerobeamon kaj ĉiujn Izraelidojn antaŭ Abija kaj la
Judoj. **16** Kaj la Izraelidoj ekkuris antaŭ la Judoj, kaj
Dio transdonis ilin en la manojn de ĉi tiuj. **17** Kaj
Abija kaj lia popolo faris inter ili grandan baton; kaj
falis mortigitoj el Izrael kvincent mil viroj elektitaj.
**18** Tiam humiliĝis la Izraelidoj, kaj fortiĝis la Judoj,
ĉar ili apogis sin sur la Eternulo, Dio de iliaj patroj.
**19** Kaj Abija persekutis Jerobeamon, kaj prenis de
li urbojn: Bet-Elon kun ĝiaj filinurboj, Jeŝanan kun
ĝiaj filinurboj, kaj Efrainon kun ĝiaj filinurboj. **20**
Kaj Jerobeam ne plu refortiĝis en la tempo de Abija.
Kaj la Eternulo frapis lin, kaj li mortis. **21** Sed Abija
fortiĝis. Kaj li prenis al si dek kvar edzinojn, kaj li
naskigis dudek du filojn kaj dek ses filinojn. **22** La
cetera historio de Abija, liaj agoj, kaj liaj vortoj estas
priskribitaj en la komentario de la profeto Ido.

**14** Kaj Abija ekdormis kun siaj patroj, kaj oni
enterigis lin en la urbo de David. Kaj anstataŭ
li ekreĝis lia filo Asa. En lia tempo la lando estis
trankvila dum dek jaroj. **2** Asa agadis bone kaj juste
antaŭ la Eternulo, sia Dio. **3** Li forigis la altarojn de
fremdaj dioj kaj la altaĵojn, li disbatis la statuojn,
kaj dehakis la sanktajn stangojn. **4** Kaj li ordonis al
la Judoj turni sin al la Eternulo, Dio de iliaj patroj,
por plenumi la instruon kaj la ordonojn. **5** Li forigis
el ĉiuj urboj de Judujo la altaĵojn kaj la kolonojn
de la suno. Kaj la regno estis trankvila sub li. **6** Li
konstruis urbojn fortikigitajn en Judujo; la lando estis
trankvila, kaj li ne havis militon en tiuj jaroj, ĉar la
Eternulo donis al li ripozon. **7** Kaj li diris al la Judoj:
Ni prikonstruu ĉi tiujn urbojn, ni ĉirkaŭigu ilin per
muregoj kaj turoj, pordoj, kaj rigliloj. La lando estas
ankoraŭ nia, ĉar ni turnis nin al la Eternulo, nia Dio;
ni turnis nin, kaj Li donis al ni trankvilecon ĉirkaŭe.
Kaj ili konstruis, kaj la afero iris sukcese. **8** Kaj Asa
havis militistaron: da viroj armitaj per ŝildo kaj lanco
el la Jehudaidoj tricent mil, kaj el la Benjamenidoj da
viroj portantaj manŝildon kaj pafantaj per pafarko
estis ducent okdek mil; ĉiuj ili estis bravaj militistoj. **9**
Eliris kontraŭ ilin Zeraĥ, la Etiopo, kun militistaro
de unu miliono kaj kun tricent ĉaroj, kaj li venis ĝis
Mareŝa. **10** Kaj eliris Asa renkonte al li, kaj ili aranĝiĝis
al batalo en la valo Cefata, apud Mareŝa. **11** Kaj Asa
ekvokis al la Eternulo, sia Dio, kaj diris: Ho Eternulo,
por Vi ne estas diferenco helpi al grandnombrulo aŭ
al senfortulo; helpu do al ni, ho Eternulo, nia Dio,
ĉar sur Vi ni nin apogas kaj en Via nomo ni venis
kontraŭ ĉi tiun grandan anaron. Ho Eternulo, Vi estas

nia Dio; kontraŭ Vi neniu homo montriĝu forta. 12 Kaj
la Eternulo frapis la Etiopojn antaŭ Asa kaj antaŭ la
Judoj, kaj la Etiopoj forkuris. 13 Kaj Asa, kaj la popolo,
kiu estis kun li, persekutis ilin ĝis Gerar; kaj la Etiopoj
falis tiel, ke neniu el ili restis vivanta; ĉar ili estis
frakasitaj antaŭ la Eternulo kaj antaŭ Lia militistaro.
Kaj ili forportis tre multe da militakiraĵo. 14 Kaj ili
venkobatis ĉiujn urbojn ĉirkaŭe de Gerar, ĉar sur ilin
falis teruro de la Eternulo; kaj ili prirabis ĉiujn urbojn,
ĉar en ili troviĝis multe da rabeblaĵo. 15 Ankaŭ ili
disbatis la tendojn de la brutoj, kaptis multe da ŝafoj
kaj da kameloj, kaj revenis en Jerusalemon.

15 Sur Azarjan, filon de Oded, venis la spirito de Dio.
2 Kaj li eliris antaŭ Asan, kaj diris al li: Aŭskultu
min, ho Asa kaj ĉiuj Jehudaidoj kaj Benjamenidoj: la
Eternulo estas kun vi, kiam vi estas kun Li; kaj se
vi Lin serĉos, vi Lin trovos, sed se vi Lin forlasos,
Li forlasos vin. 3 Dum longa tempo Izrael estos sen
la vera Dio, sen instruanta pastro, kaj sen instruo;
4 sed en sia mizero ili returnos sin al la Eternulo,
Dio de Izrael; kaj ili serĉos Lin, kaj Li trovigos Sin
al ili. 5 En tiu tempo ne havos pacon la eliranto
nek la eniranto, ĉar grandaj tumultoj estos ĉe ĉiuj
loĝantoj de la landoj. 6 Nacio disbatos nacion kaj urbo
urbon, ĉar Dio konfuzos ilin per diversaj malfeliĉoj. 7
Sed vi estu kuraĝaj, kaj ne faligu viajn manojn; ĉar
ekzistas rekompenco pro viaj faroj. 8 Kiam Asa aŭdis
tiujn vortojn kaj la profetaĵon de la profeto Oded,
li kuraĝiĝis, kaj elĵetis la abomenindaĵojn el la tuta
lando de Jehuda kaj de Benjamen, kaj el la urboj, kiujn
li venkoprenis sur la monto de Efraim; kaj li renovigis
la altaron de la Eternulo, starantan antaŭ la portiko de
la Eternulo. 9 Kaj li kunvenigis ĉiujn Jehudaidojn kaj
Benjamenidojn, kaj la kun ili loĝantajn enmigrintojn
el la tribo de Efraim, de Manase, kaj de Simeon; ĉar
ili en granda nombro transiris al li de Izrael, kiam
ili vidis, ke la Eternulo, lia Dio, estas kun li. 10 Kaj
ili kunvenis en Jerusalemon en la tria monato de la
dek-kvina jaro de la reĝado de Asa. 11 Kaj ili alportis
en tiu tago oferojn al la Eternulo el la militakiraĵo,
kiun ili venigis: sepcent bovojn kaj sep mil ŝafojn. 12
Kaj ili faris interligon, ke ili strebados al la Eternulo,
Dio de iliaj patroj, per sia tuta koro kaj per sia tuta
animo, 13 kaj ke ĉiu, kiu ne turnos sin al la Eternulo,
Dio de Izrael, devas morti, ĉu tio estas malgranda,
ĉu granda, ĉu viro, ĉu virino. 14 Kaj ili ĵuris al la
Eternulo per laŭta voĉo, per ĝojkriado, per trumpetoj
kaj kornoj. 15 Kaj ĉiuj Judoj ĝojis pri la ĵuro, ĉar ili
ĵuris el sia tuta koro, ili serĉis Lin kun plena fervoro,
kaj Li trovigis Sin al ili. Kaj la Eternulo donis al ili
trankvilecon ĉirkaŭe. 16 Kaj eĉ Maaĥan, la patrinon,
la reĝo Asa senigis je ŝia titolo de reĝino, pro tio, ke ŝi
faris idolon por Aŝtar. Kaj Asa dishakis ŝian idolon,
dispecigis ĝin kaj forbruligis ĉe la torento Kidron. 17
Tamen la altaĵoj ne estis forigitaj ĉe Izrael; sed la koro
de Asa estis perfekta dum lia tuta vivo. 18 Li enportis
en la domon de Dio la konsekritaĵojn de sia patro, kaj
siajn proprajn konsekritaĵojn, arĝenton kaj oron kaj
vazojn. 19 Kaj ne estis milito ĝis la tridek-kvina jaro
de la reĝado de Asa.

16 En la tridek-sesa jaro de la reĝado de Asa iris
Baaŝa, reĝo de Izrael, kontraŭ Judujon, kaj li
konstruis Raman, por bari la eliradon kaj eniradon al
Asa, reĝo de Judujo. 2 Tiam Asa elprenis arĝenton kaj
oron el la trezorejoj de la domo de la Eternulo kaj de
la reĝa domo, kaj sendis al Ben-Hadad, reĝo de Sirio,
kiu loĝis en Damasko, kaj dirigis al li: 3 Estas interligo
inter mi kaj vi, kiel inter mia patro kaj via patro;
jen mi sendas al vi arĝenton kaj oron: neniigu vian
interligon kun Baaŝa, reĝo de Izrael, por ke li foriru
de mi. 4 Kaj Ben-Hadad obeis la reĝon Asa, kaj sendis
siajn militestrojn kontraŭ la urbojn de Izrael, kaj ili
venkobatis Ijonon kaj Danon kaj Abel-Maimon, kaj
ĉiujn provizejojn en la urboj de Naftali. 5 Kiam Baaŝa
tion aŭdis, li ĉesis konstrui Raman kaj haltigis sian
laboradon. 6 Tiam la reĝo Asa prenis ĉiujn Judojn;
kaj ili forportis la ŝtonojn de Rama kaj ĝian lignon,
el kiuj Baaŝa faris la konstruadon; kaj li konstruis
el tio Geban kaj Micpan. 7 En tiu tempo venis la
antaŭvidisto Ĥanani al Asa, reĝo de Judujo, kaj diris al
li: Ĉar vi apogis vin sur la reĝo de Sirio, kaj ne apogis
vin sur la Eternulo, via Dio, tial saviĝis el via mano
la militistaro de la reĝo de Sirio. 8 Ĉu la Etiopoj kaj
Luboj ne estis kun granda forto, kun ĉaroj kaj rajdistoj
en tre granda nombro? tamen, ĉar vi apogis vin sur la
Eternulo, Li transdonis ilin en vian manon; 9 ĉar la
okuloj de la Eternulo ĉirkaŭrigardas la tutan teron,
por subteni tiujn, kies koro estas plene aldonita al
Li. Malsaĝe vi agis per ĉi tio; pro tio de nun vi havos
militojn. 10 Asa ekkoleris kontraŭ la antaŭvidisto kaj
metis lin en malliberejon, ĉar li indignis kontraŭ li
pro tio; ankaŭ kelkajn el la popolo Asa premis en tiu

tempo. 11 La historio de Asa, la unua kaj la lasta, estas
priskribita en la libro de la reĝoj de Judujo kaj Izrael.
12 En la tridek-naŭa jaro de sia reĝado Asa malsaniĝis
je siaj piedoj; tre forta fariĝis lia malsano; sed eĉ
en sia malsano li turnis sin ne al la Eternulo, sed al
kuracistoj. 13 Kaj Asa ekdormis kun siaj patroj, kaj
mortis en la kvardek-unua jaro de sia reĝado. 14 Kaj
oni enterigis lin en lia tombo, kiun li pretigis al si en
la urbo de David; kaj oni kuŝigis lin sur lito plenigita
de aromaĵoj kaj diversaj lerte preparitaj ŝmiraĵoj, kaj
oni faris por li tre grandan brulon.

17 Anstataŭ li ekreĝis lia filo Jehoŝafat. Kaj li
fariĝis potenca kontraŭ Izrael. 2 Li starigis
militistaron en ĉiuj fortikigitaj urboj de Judujo, kaj
starigis garnizonojn en la lando de Jehuda, kaj en la
urboj de Efraim, kiujn venkoprenis lia patro Asa. 3
Kaj la Eternulo estis kun Jehoŝafat, ĉar li iradis laŭ la
antaŭaj vojoj de sia patro David kaj ne turnis sin al la
Baaloj, 4 sed nur la Dion de sia patro li serĉis kaj Liajn
ordonojn li sekvis, ne simile al la agado de Izrael. 5
Kaj la Eternulo fortikigis la regnon en lia mano, kaj
ĉiuj Judoj donacis donacojn al Jehoŝafat, kaj li havis
multe da riĉeco kaj da honoro. 6 Lia koro altiĝis sur
la vojoj de la Eternulo; li ankaŭ forigis la altaĵojn
kaj la sanktajn stangojn el Judujo. 7 En la tria jaro
de lia reĝado li sendis siajn eminentulojn Ben-Ĥail,
Obadja, Zeĥarja, Netanel, kaj Miĥaja, ke ili instruu en
la urboj de Judujo; 8 kaj kun ili la Levidojn Ŝemaja,
Netanja, Zebadja, Asahel, Ŝemiramot, Jehonatan,
Adonija, Tobija, kaj Tob-Adonija, la Levidojn, kaj kun
ili la pastrojn Eliŝama kaj Jehoram. 9 Kaj ili instruis
en Judujo, havante kun si libron de instruo de la
Eternulo; ili trairis ĉiujn urbojn de Judujo kaj instruis
la popolon. 10 Kaj timo antaŭ la Eternulo estis en
ĉiuj regnoj de la landoj, kiuj estis ĉirkaŭ Judujo, kaj
ili ne militis kontraŭ Jehoŝafat. 11 De la Filiŝtoj oni
alportadis al Jehoŝafat donacojn, kaj arĝenton kiel
tributon; ankaŭ la Araboj venigadis al li malgrandajn
brutojn: sep mil sepcent ŝafojn kaj sep mil sepcent
kaprojn. 12 Jehoŝafat fariĝadis ĉiam pli granda kaj
atingis grandan altecon. Kaj li konstruis en Judujo
kastelojn kaj grenurbojn. 13 Kaj multe da laboroj li
havis en la urboj de Judujo, kaj bravajn militistojn en
Jerusalem. 14 Jen estas ilia ordo laŭ iliaj patrodomoj:
ĉe la Jehudaidoj estis milestroj: la estro Adna, kaj kun
li estis tricent mil bravaj militistoj; 15 apud li estis la
estro Jehoĥanan, kaj kun li ducent okdek mil; 16 apud
li estis Amasja, filo de Ziĥri, kiu konsekris sin al la
Eternulo, kaj kun li estis ducent mil bravaj militistoj.
17 Ĉe la Benjamenidoj estis: brava militisto Eljada, kaj
kun li ducent mil viroj armitaj per pafarko kaj ŝildo;
18 apud li estis Jehozabad, kaj kun li cent okdek mil
viroj armitaj por la militistaro. 19 Tiuj servis al la
reĝo, krom tiuj, kiujn la reĝo starigis en la fortikigitaj
urboj de la tuta Judujo.

18 Jehoŝafat havis multe da riĉeco kaj honoro; kaj
li boparenciĝis kun Aĥab. 2 Post kelke da jaroj li
veturis al Aĥab en Samarion. Kaj Aĥab buĉis multe da
ŝafoj kaj bovoj por li, kaj por la popolo, kiu estis kun li,
kaj konvinkis lin iri kontraŭ Ramoton en Gilead. 3 Kaj
Aĥab, reĝo de Izrael, diris al Jehoŝafat, reĝo de Judujo:
Ĉu vi iros kun mi kontraŭ Ramoton en Gilead? Kaj ĉi
tiu respondis al li: Mi estas kiel vi, kaj mia popolo
estas kiel via popolo; ni iros kun vi en la militon. 4 Kaj
Jehoŝafat diris al la reĝo de Izrael: Demandu hodiaŭ
la vorton de la Eternulo. 5 Tiam la reĝo de Izrael
kunvenigis la profetojn, kvarcent homojn, kaj diris al
ili: Ĉu ni iru milite kontraŭ Ramoton en Gilead, aŭ
mi tion ne faru? Kaj ili respondis: Iru, kaj Dio ĝin
transdonos en la manon de la reĝo. 6 Sed Jehoŝafat
diris: Ĉu ne troviĝas ĉi tie ankoraŭ iu profeto de la
Eternulo, kiun ni povus demandi? 7 Kaj la reĝo de
Izrael diris al Jehoŝafat: Ekzistas ankoraŭ unu homo,
per kiu ni povas demandi la Eternulon, sed mi lin
malamas, ĉar neniam li profetas pri mi ion bonan, sed
dum sia tuta vivo nur malbonon; tio estas Miĥaja, filo
de Jimla. Sed Jehoŝafat diris: La reĝo ne parolu tiel. 8
Tiam la reĝo de Izrael alvokis unu korteganon, kaj
diris: Venigu rapide Miĥajan, filon de Jimla. 9 La reĝo
de Izrael, kaj Jehoŝafat, reĝo de Judujo, sidis ĉiu sur sia
seĝo, vestitaj per siaj vestoj; ili sidis sur placo antaŭ
la pordego de Samario, kaj ĉiuj profetoj profetadis
antaŭ ili. 10 Kaj Cidkija, filo de Kenaana, faris al
si ferajn kornojn, kaj diris: Tiele diras la Eternulo:
Per ĉi tio vi kornobatos la Sirianojn, ĝis vi ilin tute
ekstermos. 11 Kaj ĉiuj profetoj profetis tiel same,
dirante: Iru kontraŭ Ramoton en Gilead kaj sukcesu,
ĉar la Eternulo ĝin transdonos en la manon de la reĝo.
12 La sendito, kiu iris por voki Miĥajan, diris al li: Jen
la vortoj de la profetoj unuanime antaŭdiras bonon al
la reĝo; estu do via vorto simila al la vorto de ĉiu el
ili, kaj antaŭdiru bonon. 13 Sed Miĥaja diris: Kiel vivas
la Eternulo: kion mia Dio diros al mi, tion mi diros. 14

Kaj kiam li venis al la reĝo, la reĝo diris al li: Miĥaja!
ĉu ni iru milite kontraŭ Ramoton en Gilead, aŭ ni tion
ne faru? Kaj tiu diris: Iru kaj sukcesu, kaj ili estos
transdonitaj en vian manon. 15 Tiam la reĝo diris al
li: Multfoje mi vin ĵurligas, ke vi parolu al mi nur la
veron en la nomo de la Eternulo. 16 Kaj tiu diris: Mi
vidis ĉiujn Izraelidojn disĵetitaj sur la montoj, kiel
ŝafoj, kiuj ne havas paŝtanton; kaj la Eternulo diris:
Ili ne havas estrojn, ili reiru pace ĉiu al sia domo.
17 Kaj la reĝo de Izrael diris al Jehoŝafat: Ĉu mi ne
diris al vi, ke li profetos pri mi ne bonon, sed nur
malbonon? 18 Sed Miĥaja diris: Tial aŭskultu la vorton
de la Eternulo: mi vidis la Eternulon, sidantan sur Sia
trono, kaj la tuta armeo de la ĉielo staris dekstre kaj
maldekstre de Li. 19 Kaj la Eternulo diris: Kiu allogos
Aĥabon, reĝon de Izrael, ke li iru kaj falu en Ramot
en Gilead? Kaj unu parolis tiel, alia parolis alie. 20
Tiam eliris spirito kaj stariĝis antaŭ la Eternulo, kaj
diris: Mi lin allogos. Kaj la Eternulo diris al li: Per kio?
21 Kaj tiu respondis: Mi eliros kaj faros min spirito
mensoga en la buŝo de ĉiuj liaj profetoj. Kaj Li diris:
Vi allogos kaj havos sukceson; eliru kaj agu tiel. 22 Kaj
nun jen la Eternulo metis mensogan spiriton en la
buŝon de tiuj viaj profetoj, kaj la Eternulo decidis por
vi malbonon. 23 Tiam aliris Cidkija, filo de Kenaana,
kaj frapis Miĥajan sur la vango, kaj diris: Per kiu vojo
la spirito de la Eternulo transiris de mi, por paroli
per vi? 24 Miĥaja respondis: Jen vi tion vidos en tiu
tago, kiam vi eniros en internan ĉambron, por vin
kaŝi. 25 Tiam la reĝo de Izrael diris: Prenu Miĥajan,
kaj konduku lin al la urbestro Amon kaj al la reĝido
Joaŝ, 26 kaj diru: Tiele diras la reĝo: Metu ĉi tiun en
malliberejon, kaj nutru lin per mizera pano kaj mizera
akvo, ĝis mi revenos en paco. 27 Sed Miĥaja diris: Se
vi revenos en paco, en tiu okazo ne parolis per mi la
Eternulo. Kaj li diris: Aŭskultu, ĉiuj popoloj. 28 Kaj
la reĝo de Izrael, kaj Jehoŝafat, reĝo de Judujo, iris
al Ramot en Gilead. 29 Kaj la reĝo de Izrael diris al
Jehoŝafat: Mi alivestos min kaj iros en la batalon, sed
vi surmetu viajn vestojn. Kaj la reĝo de Izrael alivestis
sin, kaj ili iris en la batalon. 30 Kaj la reĝo de Sirio
ordonis al siaj ĉarestroj jene: Batalu ne kontraŭ iu
malgranda aŭ granda, sed sole nur kontraŭ la reĝo
de Izrael. 31 Kiam la ĉarestroj ekvidis Jehoŝafaton, ili
pensis, ke tio estas la reĝo de Izrael, kaj ili ĉirkaŭis
lin, por batali kontraŭ li; sed Jehoŝafat ekkriis, kaj la
Eternulo helpis al li, kaj Dio forigis ilin de li. 32 Kiam
la ĉarestroj vidis, ke tio ne estas la reĝo de Izrael, ili
forturnis sin de li. 33 Kaj unu viro sen ia celo streĉis la
pafarkon, kaj vundis la reĝon de Izrael inter la artikoj
de la kiraso. Kaj ĉi tiu diris al sia veturiganto: Turnu
vian manon kaj elveturigu min el la militistaro, ĉar
mi estas vundita. 34 Sed la batalo plifortiĝis en tiu
tago; kaj la reĝo de Izrael staris sur la ĉaro kontraŭ la
Sirianoj ĝis la vespero, kaj li mortis en la momento de
la malleviĝo de la suno.

**19** Jehoŝafat, reĝo de Judujo, revenis bonstate
en sian hejmon, en Jerusalemon. 2 Kaj eliris
renkonte al li Jehu, filo de Ĥanani, la viziisto, kaj diris
al la reĝo Jehoŝafat: Ĉu oni devas helpi al malvirtulo?
vi amas la malamikojn de la Eternulo, kaj pro tio estas
sur vi la kolero de la Eternulo. 3 Tamen bonaĵoj estas
trovitaj en vi, ĉar vi ekstermis la sanktajn stangojn el
la lando kaj direktis vian koron al la serĉado de Dio. 4
Kaj Jehoŝafat loĝis en Jerusalem. Kaj denove li iris
al la popolo, de Beer-Ŝeba ĝis la monto de Efraim,
kaj revenigis ilin al la Eternulo, Dio de iliaj patroj. 5
Li starigis juĝistojn en la lando, en ĉiuj fortikigitaj
urboj de Judujo, en ĉiu urbo aparte. 6 Kaj li diris al la
juĝistoj: Rigardu, kion vi faras, ĉar ne por homo vi
juĝas, sed por la Eternulo; Li estos kun vi en la aferoj
de juĝado. 7 Estu do en vi timo antaŭ la Eternulo,
agadu singarde; ĉar ĉe la Eternulo, nia Dio, ne ekzistas
maljusteco, nek personfavorado, nek akceptado de
subaĉetoj. 8 Ankaŭ en Jerusalem Jehoŝafat starigis
virojn el la Levidoj, pastroj, kaj ĉefoj de patrodomoj
de Izrael, por juĝado antaŭ la Eternulo kaj por juĝaj
disputoj. Kaj ili revenis al Jerusalem. 9 Kaj li ordonis
al ili jene: Tiele agu en timo antaŭ la Eternulo, en
fideleco kaj kun pura koro: 10 en ĉiu juĝa disputo,
kiu venos antaŭ vin de viaj fratoj, kiuj loĝas en siaj
urboj, ĉu pri afero de sango, ĉu pri religia preskribo,
ordono, leĝoj, aŭ decidoj, klarigu al ili, por ke ili ne
kulpiĝu antaŭ la Eternulo kaj por ke ne falu kolero sur
vin kaj sur viajn fratojn; tiel agu, tiam vi ne fariĝos
kulpaj. 11 Kaj jen la ĉefpastro Amarja estas super vi
en ĉiu afero koncernanta la Eternulon, kaj Zebadja,
filo de Iŝmael, la princo el la domo de Jehuda, en ĉiu
afero koncernanta la reĝon, kaj la Levidojn vi havas
antaŭ vi kiel oficistojn. Tenu vin forte kaj agadu, kaj
la Eternulo estos kun la bonulo.

**20** Post tio la Moabidoj kaj la Amonidoj, kaj kun
ili ankaŭ najbaroj de la Amonidoj, iris milite

kontraŭ Jehoŝafaton. 2 Kaj oni venis kaj raportis al
Jehoŝafat, dirante: Venis kontraŭ vin granda multo da
homoj de trans la maro, el Sirio; kaj jen ili nun estas
en Ĥacacon-Tamar, tio estas en En-Gedi. 3 Jehoŝafat
ektimis, kaj decidis turni sin al la Eternulo. Kaj li
proklamis faston en la tuta Judujo. 4 Kaj kunvenis la
Judoj, por peti la Eternulon; el ĉiuj urboj de Judujo ili
venis, por peti la Eternulon. 5 Jehoŝafat stariĝis inter
la komunumo de Judujo kaj Jerusalem en la domo
de la Eternulo, antaŭ la nova korto. 6 Kaj li diris:
Ho Eternulo, Dio de niaj patroj! Vi estas ja Dio en la
ĉielo, kaj Vi regas super ĉiuj regnoj de la nacioj, en
Via mano estas forto kaj potenco, kaj neniu povas
kontraŭstari al Vi. 7 Vi, nia Dio, forpelis ja la loĝantojn
de ĉi tiu lando antaŭ Via popolo Izrael, kaj donis ĝin
al la idaro de Abraham, Via amanto, por ĉiam. 8 Kaj ili
enloĝiĝis en ĝi, kaj konstruis por Vi en ĝi sanktejon
al Via nomo, dirante: 9 Se venos sur nin malfeliĉo,
glavo, puno, pesto, aŭ malsato, tiam ni stariĝos antaŭ
ĉi tiu domo kaj antaŭ Vi, ĉar Via nomo estas en ĉi tiu
domo, kaj ni vokos al Vi el nia mizero, kaj Vi aŭdos
kaj helpos. 10 Kaj nun jen la Amonidoj kaj la Moabidoj
kaj la loĝantoj de la monto Seir, tra kies lando Vi ne
permesis al la Izraelidoj iri, kiam ili iris el la lando
Egipta, sed ili devis iri preter kaj ne ekstermi ilin
— 11 jen ili repagas al ni, venante, por elpeli nin el
Via heredaĵo, kiun Vi donis al ni. 12 Ho nia Dio, ĉu
Vi ne juĝos ilin? ĉar ni ne havas forton kontraŭ ĉi
tiu granda homamaso, kiu venis kontraŭ nin, kaj ni
ne scias, kion ni devas fari, sed al Vi sin turnas niaj
okuloj. 13 Kaj ĉiuj Judoj staris antaŭ la Eternulo, ankaŭ
iliaj infanoj, edzinoj, kaj filoj. 14 Tiam sur Jaĥaziel,
filo de Zeĥarja, filo de Benaja, filo de Jeiel, filo de
Matanja, Levido el la idoj de Asaf, aperis la spirito
de la Eternulo meze de la komunumo; 15 kaj li diris:
Aŭskultu, ĉiuj Judoj kaj loĝantoj de Jerusalem kaj reĝo
Jehoŝafat! Tiele diras al vi la Eternulo: Ne timu kaj
ne sentu teruron antaŭ ĉi tiu granda homamaso, ĉar
la milito estas ne kontraŭ vi, sed kontraŭ Dio. 16
Morgaŭ malsupreniru sur ilin: jen ili supreniras sur
la altaĵon de Cic, kaj vi trovos ilin en la fino de la
valo, antaŭ la dezerto Jeruel. 17 Ne vi devas batali ĉi
tiun fojon: stariĝu, staru, kaj rigardu la savon, kiun la
Eternulo sendas al vi, ho Judujo kaj Jerusalem. Ne
timu kaj ne sentu teruron: morgaŭ eliru kontraŭ ilin,
kaj la Eternulo estos kun vi. 18 Tiam Jehoŝafat kliniĝis
vizaĝaltere, kaj ĉiuj Judoj kaj loĝantoj de Jerusalem
ĵetis sin antaŭ la Eternulo, por adorkliniĝi antaŭ la
Eternulo. 19 Kaj leviĝis la Levidoj el la Kehatidoj kaj
el la Koraĥidoj, por ekkanti gloron al la Eternulo,
Dio de Izrael, per laŭta voĉo alten. 20 Ili leviĝis frue
matene kaj eliris al la dezerto de Tekoa; kaj kiam ili
eliris, stariĝis Jehoŝafat, kaj diris: Aŭskultu min, ho
Judoj kaj loĝantoj de Jerusalem! kredu je la Eternulo,
via Dio, kaj havu fidon; kredu je Liaj profetoj, kaj vi
havos sukceson. 21 Kaj li konsiliĝis kun la popolo, kaj
li starigis kantistojn al la Eternulo, ke ili glorkantu en
sankta ornamo, irante antaŭ la armitoj, kaj parolu:
Gloru la Eternulon, ĉar eterna estas Lia favorkoreco.
22 Kaj en la tempo, kiam ili komencis ĝojkrii kaj
glorkanti, la Eternulo starigis embuskon kontraŭ la
Amonidoj, Moabidoj, kaj Seiranoj, kiuj venis kontraŭ
Judujon, kaj ili estis batitaj. 23 Kaj stariĝis la Amonidoj
kaj Moabidoj kontraŭ la loĝantoj de la monto Seir, por
pereigi kaj ekstermi; kaj kiam ili finis kun la loĝantoj
de Seir, ili komencis ekstermi unu la alian. 24 Kiam la
Judoj venis sur la observejon en la dezerto kaj turnis
sin al la homamaso, ili ekvidis kadavrojn, kiuj falis sur
la teron, kaj neniu saviĝis. 25 Kaj venis Jehoŝafat kaj lia
popolo, por preni la militakiraĵon; kaj ili trovis ĉe ili
multe da havaĵo, vestoj, kaj multekostaj objektoj, kaj
prenis al si tiom, ke ili ne povis porti. Kaj dum tri tagoj
ili forprenadis la militakiraĵon, ĉar estis tre multe da
ĝi. 26 En la kvara tago ili kolektiĝis en la Valo de Beno,
ĉar tie ili benis la Eternulon; pro tio oni donis al tiu
loko la nomon Valo de Beno ĝis la nuna tago. 27 Kaj
ĉiuj Judoj kaj Jerusalemanoj, kun Jehoŝafat antaŭe,
iris returne, por reiri kun ĝojo en Jerusalemon; ĉar
la Eternulo donis al ili ĝojon pri iliaj malamikoj. 28
Kaj ili venis en Jerusalemon kun psalteroj, harpoj,
kaj trumpetoj, al la domo de la Eternulo. 29 Kaj timo
antaŭ Dio venis sur ĉiujn regnojn de la landoj, kiam ili
aŭdis, ke la Eternulo militis kontraŭ la malamikoj de
Izrael. 30 Kaj trankviliĝis la regno de Jehoŝafat; kaj lia
Dio donis al li trankvilecon ĉirkaŭe. 31 Jehoŝafat reĝis
super Judujo; la aĝon de tridek kvin jaroj li havis,
kiam li fariĝis reĝo, kaj dudek kvin jarojn li reĝis
en Jerusalem. La nomo de lia patrino estis Azuba,
filino de Ŝilĥi. 32 Li iradis laŭ la vojo de sia patro Asa
kaj ne deturniĝis de ĝi, agante tiel, kiel plaĉas al la
Eternulo. 33 Tamen la altaĵoj ne estis forigitaj, kaj la
popolo ankoraŭ ne turnis forte sian koron al Dio de
ĝiaj patroj. 34 La cetera historio de Jehoŝafat, la unua
kaj la lasta, estas priskribita en la kroniko de Jehu, filo

de Ĥanani, kiu estas enigita en la libron de la reĝoj de
Izrael. 35 Poste Jehoŝafat, reĝo de Judujo, amikiĝis kun
Aĥazja, reĝo de Izrael, kiu agadis malpie. 36 Li kuniĝis
kun li, por fari ŝipojn, irontajn en Tarŝiŝon. Kaj li
konstruis ŝipojn en Ecjon-Geber. 37 Tiam Eliezer, filo
de Dodava, el Mareŝa, eldiris profetaĵon pri Jehoŝafat
jene: Pro tio, ke vi kuniĝis kun Aĥazja, la Eternulo
disbatis viajn aferojn. Kaj la ŝipoj rompiĝis kaj ne
povis iri en Tarŝiŝon.

**21** Jehoŝafat ekdormis kun siaj patroj, kaj oni
enterigis lin kun liaj patroj en la urbo de David.
Kaj anstataŭ li ekreĝis lia filo Jehoram. 2 Li havis
fratojn, filojn de Jehoŝafat: Azarja, Jeĥiel, Zeĥarja,
Azarjahu, Miĥael, kaj Ŝefatja. Ĉiuj ili estis filoj de
Jehoŝafat, reĝo de Judujo. 3 Ilia patro donis al ili
multe da donacoj, arĝenton, oron, multekostaĵojn, kaj
fortikigitajn urbojn en Judujo; sed la regnon li donis al
Jehoram, ĉar li estis la unuenaskito. 4 Kiam Jehoram
estriĝis super la regno de sia patro kaj fortiĝis, li
mortigis per glavo ĉiujn siajn fratojn kaj ankaŭ kelkajn
el la eminentuloj de Izrael. 5 La aĝon de tridek du
jaroj havis Jehoram, kiam li fariĝis reĝo, kaj ok jarojn
li reĝis en Jerusalem. 6 Li iradis laŭ la vojo de la reĝoj
de Izrael, kiel faris la domo de Aĥab, ĉar filino de
Aĥab estis lia edzino, kaj li faradis malbonon antaŭ
la Eternulo. 7 Tamen la Eternulo ne volis pereigi la
domon de David, pro la interligo, kiun Li faris kun
David, kaj ĉar Li promesis doni lumilon al li kaj al liaj
filoj por ĉiam. 8 En lia tempo la Edomidoj defalis de
Judujo kaj starigis super si reĝon. 9 Tiam Jehoram
kun siaj militestroj kaj kun ĉiuj siaj ĉaroj eliris; kaj li
leviĝis nokte, kaj venkobatis la Edomidojn, kiuj estis
ĉirkaŭ li, kaj la ĉarestrojn. 10 Tamen la Edomidoj restis
defalintaj de Judujo ĝis la nuna tago. En la sama tempo
ankaŭ Libna defalis de li, ĉar li forlasis la Eternulon,
Dion de liaj patroj. 11 Li ankaŭ aranĝis altaĵojn sur
la montoj de Judujo, li malĉastigis la loĝantojn de
Jerusalem kaj delogis Judujon. 12 Kaj venis al li letero
de la profeto Elija, en kiu estis skribite: Tiele diras
la Eternulo, Dio de via patro David: Pro tio, ke vi ne
iradis laŭ la vojoj de via patro Jehoŝafat, kaj laŭ la
vojoj de Asa, reĝo de Judujo, 13 sed vi iradis laŭ la
vojo de la reĝoj de Izrael, kaj malĉastigis Judujon kaj
la loĝantojn de Jerusalem, kiel malĉastigis la domo
de Aĥab, kaj eĉ viajn fratojn, la domon de via patro,
kiuj estis pli bonaj ol vi, vi mortigis: 14 pro tio jen
la Eternulo frapos per granda plago vian popolon,
viajn filojn, viajn edzinojn, kaj vian tutan havaĵon; 15
kaj vi mem havos grandan malsanon, malsanon en
viaj internaĵoj tian, ke pro la malsano elfalados viaj
internaĵoj ĉiutage. 16 Kaj la Eternulo ekscitis kontraŭ
Jehoram la spiriton de la Filiŝtoj, kaj de la Araboj, kiuj
loĝis apude de la Etiopoj; 17 kaj ili iris kontraŭ Judujon
kaj penetris en ĝin, kaj forprenis la tutan havaĵon,
kiu troviĝis en la reĝa domo, ankaŭ liajn filojn kaj
liajn edzinojn; kaj restis ĉe li neniu filo, krom lia plej
juna filo Jehoaĥaz. 18 Kaj post ĉio ĉi tio la Eternulo
frapis liajn internaĵojn per nesanigebla malsano. 19
Kaj tio daŭris de tago al tago; kaj kiam finiĝis du jaroj,
liaj internaĵoj eliris de li kune kun lia malsano, kaj
li mortis en grandaj doloroj; kaj lia popolo ne faris
al li brulon, kiel la bruloj por liaj patroj. 20 La aĝon
de tridek du jaroj li havis, kiam li fariĝis reĝo, kaj ok
jarojn li reĝis en Jerusalem; li foriris ne estimata, kaj
oni enterigis lin en la urbo de David, sed ne en la
tomboj de la reĝoj.

**22** La loĝantoj de Jerusalem ekreĝigis lian plej
junan filon Aĥazja anstataŭ li, ĉar ĉiujn pli aĝajn
mortigis la taĉmento, kiu venis kun la Araboj en la
tendaron. Kaj ekreĝis Aĥazja, filo de Jehoram, reĝo de
Judujo. 2 La aĝon de kvardek du jaroj havis Aĥazja,
kiam li fariĝis reĝo, kaj unu jaron li reĝis en Jerusalem.
La nomo de lia patrino estis Atalja, filino de Omri. 3
Li ankaŭ iradis laŭ la vojoj de la domo de Aĥab, ĉar
lia patrino estis lia konsilantino por malbonagi. 4 Li
faradis malbonon antaŭ la Eternulo, kiel la domo de
Aĥab, ĉar ili estis liaj konsilantoj post la morto de lia
patro, por pereigi lin. 5 Ankaŭ ilian konsilon li sekvis,
kaj iris kun Jehoram, filo de Aĥab, milite kontraŭ
Ĥazaelon, reĝon de Sirio, al Ramot en Gilead. Kaj la
Sirianoj vundis Jehoramon. 6 Kaj li revenis, por kuraci
sin en Jizreel de la vundoj, kiujn oni faris al li en
Ramot, kiam li batalis kontraŭ Ĥazael, reĝo de Sirio.
Kaj Azarja, filo de Jehoram, reĝo de Judujo, iris por
viziti Jehoramon, filon de Aĥab, en Jizreel, ĉar ĉi tiu
estis malsana. 7 Sed de Dio estis destinita pereo por
Aĥazja per tio, ke li venis al Jehoram: post sia veno
li eliris kun Jehoram kontraŭ Jehun, filon de Nimŝi,
kiun la Eternulo sanktoleis, por ekstermi la domon de
Aĥab. 8 Kiam Jehu faris juĝon sur la domo de Aĥab, li
trovis la eminentulojn de Judujo kaj la filojn de la
fratoj de Aĥazja, kiuj servis al Aĥazja, kaj li mortigis
ilin. 9 Kaj li serĉis Aĥazjan, kaj oni kaptis lin, kiam li

estis kaŝita en Samario; kaj oni venigis lin al Jehu kaj
mortigis lin kaj enterigis lin, ĉar oni diris: Li estas filo
de Jehoŝafat, kiu strebis al la Eternulo per sia tuta
koro. Kaj el la domo de Aĥazja restis neniu, kiu povus
reĝi. 10 Kiam Atalja, la patrino de Aĥazja, vidis, ke
ŝia filo mortis, ŝi leviĝis kaj ekstermis la tutan reĝan
idaron de la domo de Jehuda. 11 Sed Jehoŝabeat, filino
de la reĝo, prenis Joaŝon, filon de Aĥazja, kaj ŝtele
elkondukis lin el inter la mortigataj filoj de la reĝo kaj
lokis lin kaj lian nutristinon en la ĉambro de litoj;
kaj kaŝis lin Jehoŝabeat, filino de la reĝo Jehoram kaj
edzino de la pastro Jehojada (ĉar ŝi estis fratino de
Aĥazja), for de Atalja, kaj ĉi tiu lin ne mortigis. 12 Kaj
li restis kaŝita ĉe ili en la domo de Dio dum ses jaroj;
kaj Atalja reĝis en la lando.

**23** Sed en la sepa jaro kuraĝis Jehojada kaj prenis
al si en interligon la centestrojn Azarja, filo de
Jeroĥam, Iŝmael, filo de Jehoĥanan, Azarja, filo de
Obed, Maaseja, filo de Adaja, kaj Eliŝafat, filo de Ziĥri;
2 kaj ili rondiris en Judujo kaj kolektis la Levidojn el
ĉiuj urboj de Judujo kaj la ĉefojn de patrodomoj en
Izrael kaj venis en Jerusalemon. 3 Kaj la tuta anaro
faris en la domo de Dio interligon kun la reĝo. Kaj
Jehojada diris al ili: Jen la filo de la reĝo devas reĝi,
kiel diris la Eternulo pri la filoj de David. 4 Jenon vi
devas fari: tiu triono de vi, kiu venas en sabato, el la
pastroj kaj el la Levidoj, estu pordegistoj ĉe la sojloj, 5
triono en la reĝa domo, kaj triono ĉe la Pordego de
la Fundamento; la tuta popolo estu sur la kortoj de
la domo de la Eternulo. 6 Neniu eniru en la domon
de la Eternulo, krom la pastroj kaj la servantoj el la
Levidoj; ĉi tiuj povas eniri, ĉar ili estas sanktigitaj; sed
la tuta popolo faru gardon por la Eternulo. 7 Kaj la
Levidoj ĉirkaŭu la reĝon ĉiuflanke, ĉiu kun sia batalilo
en la mano; kaj ĉiun, kiu eniros en la domon, oni
mortigu. Kaj estu apud la reĝo, kiam li eniros aŭ eliros.
8 La Levidoj kaj ĉiuj Judoj faris ĉion, kion ordonis
la pastro Jehojada; kaj ĉiu prenis siajn homojn, la
sabate venantajn kun la sabate forirantaj, ĉar la pastro
Jehojada ne forliberigis la laŭvicajn grupojn. 9 Kaj la
pastro Jehojada disdonis al la centestroj la lancojn,
ŝildojn, kaj manŝildojn de la reĝo David, kiuj estis en
la domo de Dio. 10 Kaj li starigis la tutan popolon,
ĉiun kun lia batalilo en la mano, de la dekstra flanko
de la domo ĝis la maldekstra flanko de la domo, ĉe la
altaro kaj ĉe la domo, ĉirkaŭe de la reĝo. 11 Kaj oni
elkondukis la reĝidon, metis sur lin la kronon kaj la
ateston, kaj proklamis lin reĝo; Jehojada kaj liaj filoj
sanktoleis lin, kaj diris: Vivu la reĝo! 12 Kiam Atalja
aŭdis la bruon de la popolo, kuranta kaj gloranta la
reĝon, ŝi iris al la popolo en la domon de la Eternulo.
13 Kaj ŝi ekvidis, ke jen la reĝo staras ĉe la kolono apud
la enirejo, kaj la eminentuloj kaj la trumpetistoj apud
la reĝo, kaj la tuta popolo de la lando ĝojas, kaj oni
trumpetas per trumpetoj, kaj la kantistoj staras kun
la muzikaj instrumentoj kaj glorkantas. Tiam Atalja
disŝiris siajn vestojn, kaj ekkriis: Konspiro, konspiro!
14 Tiam la pastro Jehojada elirigis la centestrojn, la
estrojn de la militistaro, kaj diris al ili: Elkonduku ŝin
ekster la vicojn; kaj kiu ŝin sekvos, tiun oni mortigu
per glavo; ĉar la pastro diris: Ne mortigu ŝin en la
domo de la Eternulo. 15 Kaj oni liberigis por ŝi lokon,
kaj ŝi iris tra la enirejo de la Pordego de Ĉevaloj al la
reĝa domo, kaj tie oni ŝin mortigis. 16 Kaj Jehojada
faris interligon inter li, la tuta popolo, kaj la reĝo, ke
ili estu popolo de la Eternulo. 17 Kaj la tuta popolo iris
en la domon de Baal kaj ĝin detruis; kaj liajn altarojn
kaj bildojn ili disrompis, kaj Matanon, la pastron de
Baal, ili mortigis antaŭ la altaroj. 18 Kaj Jehojada
komisiis la oficojn en la domo de la Eternulo al la
pastroj Levidoj, kiujn destinis David por la domo de la
Eternulo, por faradi bruloferojn al la Eternulo, kiel
estas skribite en la instruo de Moseo, kun ĝojo kaj
kantoj, laŭ la preskribo de David. 19 Kaj li starigis la
pordegistojn ĉe la pordegoj de la domo de la Eternulo,
por ke neniu povu eniri, kiu pro io estas malpura.
20 Kaj li prenis la centestrojn kaj la potenculojn kaj
la regantojn de la popolo kaj la tutan popolon de
la lando, kaj li kondukis la reĝon el la domo de la
Eternulo; kaj ili trairis tra la supra pordego en la reĝan
domon, kaj ili sidigis la reĝon sur la regna trono. 21
Kaj la tuta popolo de la lando ĝojis, kaj la urbo estis
trankvila. Sed Ataljan oni mortigis per glavo.

**24** La aĝon de sep jaroj havis Joaŝ, kiam li fariĝis
reĝo, kaj kvardek jarojn li reĝis en Jerusalem.
La nomo de lia patrino estis Cibja, el Beer-Ŝeba. 2
Joaŝ agadis bone antaŭ la Eternulo dum la tuta vivo
de la pastro Jehojada. 3 Kaj Jehojada prenis por li du
edzinojn, kaj li naskigis filojn kaj filinojn. 4 Post tio
Joaŝ ekintencis renovigi la domon de la Eternulo. 5
Kaj li kunvokis la pastrojn kaj la Levidojn, kaj diris
al ili: Iru en la urbojn de Judujo kaj kolektu de ĉiuj

Izraelidoj monon por riparadi la domon de via Dio
ĉiujare; kaj rapidu kun tiu afero. Sed la Levidoj ne
rapidis. 6 Tiam la reĝo alvokis Jehojadan, ilian ĉefon,
kaj diris al li: Kial vi ne postulas de la Levidoj, ke ili
alportadu el Judujo kaj Jerusalem la imposton, kiun
Moseo, la servanto de la Eternulo, kaj la komunumo
de Izrael starigis por la tabernaklo de la interligo? 7
Ĉar la malpia Atalja kaj ŝiaj filoj ruinigis la domon
de Dio; kaj ĉion, kio estis sanktigita por la domo
de la Eternulo, ili uzis por la Baaloj. 8 Kaj la reĝo
ordonis, kaj oni faris unu keston kaj starigis ĝin ĉe
la pordego de la domo de la Eternulo, ekstere. 9 Kaj
oni proklamis en Judujo kaj en Jerusalem, ke oni
alportadu al la Eternulo la imposton, kiun Moseo,
servanto de Dio, starigis por la Izraelidoj en la dezerto.
10 Kaj ekĝojis ĉiuj estroj kaj la tuta popolo, kaj ili
alportis kaj ĵetis en la keston, ĝis ĝi pleniĝis. 11 Kaj
ĉiufoje, kiam oni alportis la keston per la Levidoj en la
reĝan oficejon, kaj oni vidis, ke estas multe da mono,
venis skribisto de la reĝo kaj komisiito de la ĉefpastro,
kaj ili malplenigis la keston, kaj poste oni reportis ĝin
kaj restarigis sur ĝia loko. Tiel oni faradis ĉiutage,
kaj oni kolektis multe da mono. 12 Kaj la reĝo kaj
Jehojada donadis ĝin al la farantoj de la laboroj en la
domo de la Eternulo, kaj oni dungis ŝtonhakistojn kaj
ĉarpentistojn, por renovigi la domon de la Eternulo,
ankaŭ feraĵistojn kaj kupraĵistojn, por ripari la domon
de la Eternulo. 13 Kaj la laboristoj laboris, kaj la afero
antaŭeniris per iliaj manoj; kaj oni metis la domon de
Dio en bonan staton, kaj oni ĝin fortikigis. 14 Kiam
ili finis, ili alportis la restintan monon al la reĝo kaj
al Jehojada; el tio oni faris vazojn por la domo de la
Eternulo, vazojn por la servado kaj por la bruloferoj,
kalikojn kaj aliajn vazojn orajn kaj arĝentajn. Kaj
oni alportadis bruloferojn en la domo de la Eternulo
konstante, dum la tuta vivo de Jehojada. 15 Jehojada
maljuniĝis kaj atingis sufiĉan aĝon, kaj li mortis; la
aĝon de cent tridek jaroj li havis, kiam li mortis. 16
Kaj oni enterigis lin en la urbo de David, kun la reĝoj;
ĉar li faradis bonon en Izrael, por Dio kaj por Lia
domo. 17 Post la morto de Jehojada venis la estroj
de Judujo kaj kliniĝis antaŭ la reĝo; kaj li komencis
obeadi ilin. 18 Kaj ili forlasis la domon de la Eternulo,
Dio de iliaj patroj, kaj ili servadis al sanktaj stangoj kaj
al idoloj; kaj ekscitiĝis Lia kolero kontraŭ Judujo kaj
kontraŭ Jerusalem pro ĉi tiu ilia kulpo. 19 Li sendis al
ili profetojn, por revenigi ilin al la Eternulo; kaj ili
admonis ilin, sed ĉi tiuj ne atentis. 20 La spirito de Dio
venis sur Zeĥarjan, filon de la pastro Jehojada, kaj li
stariĝis antaŭ la popolo, kaj diris al ili: Tiele diras Dio:
Kial vi malobeas la ordonojn de la Eternulo? Vi ne
havos sukceson, ĉar vi forlasis la Eternulon, kaj tial
Li vin forlasis. 21 Ili faris konspiron kontraŭ li, kaj
ŝtonmortigis lin laŭ ordono de la reĝo sur la korto de
la domo de la Eternulo. 22 Kaj la reĝo Joaŝ ne memoris
la favorkoraĵon, kiun lia patro Jehojada faris al li, kaj li
mortigis lian filon. Ĉi tiu, mortante, diris: La Eternulo
vidu, kaj punu. 23 Post paso de unu jaro eliris kontraŭ
lin la militistaro de Sirio; kaj ili eniris en Judujon kaj
Jerusalemon kaj ekstermis el la popolo ĉiujn estrojn
de la popolo; kaj la tutan militakiraĵon ili sendis al la
reĝo de Damasko. 24 Kun nemulte da homoj venis la
militistaro de Sirio; tamen la Eternulo transdonis en
ilian manon la militistaron multe pli grandan, pro tio,
ke ĉi tiuj forlasis la Eternulon, Dion de iliaj patroj. Kaj
sur Joaŝ ili faris juĝon. 25 Kiam ili foriris de li, lasinte
lin en grava malsano, liaj servantoj faris konspiron
kontraŭ li pro la sango de la filoj de Jehojada, la
pastro, kaj ili mortigis lin sur lia lito, kaj li mortis.
Kaj oni enterigis lin en la urbo de David, sed oni ne
enterigis lin en la reĝaj tomboj. 26 La konspirintoj
kontraŭ li estis: Zabad, filo de la Amonidino Ŝimeat,
kaj Jehozabad, filo de la Moabidino Ŝimrit. 27 Pri liaj
filoj, pri la multo da mono, kiu estis kolektita sub li,
kaj pri la riparado de la domo de Dio, estas skribite en
la komentario en la libro de la reĝoj. Kaj anstataŭ li
ekreĝis lia filo Amacja.

**25** La aĝon de dudek kvin jaroj havis Amacja, kiam
li fariĝis reĝo, kaj dudek naŭ jarojn li reĝis en
Jerusalem. La nomo de lia patrino estis Jehoadan,
el Jerusalem. 2 Li agadis bone antaŭ la Eternulo,
tamen ne el plena koro. 3 Kiam lia reĝado fortikiĝis, li
mortigis siajn servantojn, kiuj mortigis la reĝon, lian
patron. 4 Sed iliajn filojn li ne mortigis, ĉar tiel estas
skribite en la instruo, en la libro de Moseo, kie la
Eternulo ordonis, dirante: Ne devas morti patroj pro
la infanoj, kaj infanoj ne devas morti pro la patroj, sed
ĉiu devas morti pro sia peko. 5 Amacja kunvenigis la
Judojn, kaj starigis ilin laŭ patrodomoj, laŭ milestroj
kaj centestroj, ĉiujn Jehudaidojn kaj Benjamenidojn;
kaj li kalkulis ilin, la havantajn la aĝon de dudek jaroj
kaj pli, kaj li trovis, ke ili prezentas la nombron de
tricent mil viroj elektitaj, povantaj iri en militon kaj

teni lancon kaj ŝildon. 6 Kaj li dungis de Izrael cent
mil bravajn militistojn pro cent kikaroj da arĝento.
7 Sed homo de Dio venis al li, kaj diris: Ho reĝo, ne
iru kun vi la militistaro de Izrael, ĉar la Eternulo
ne estas kun Izrael, kun ĉiuj idoj de Efraim; 8 sed
iru vi sola, agu kuraĝe en la milito; alie Dio faligos
vin antaŭ la malamiko, ĉar Dio havas la forton, por
helpi kaj por faligi. 9 Kaj Amacja diris al la homo
de Dio: Kion do oni faru kun la cent kikaroj, kiujn
mi donis al la militistoj de Izrael? La homo de Dio
respondis: La Eternulo povas doni al vi pli ol tio. 10
Tiam Amacja apartigis la militistojn, kiuj venis al li
el la lando de Efraim, ke ili iru al sia loko. Kaj forte
ekflamis ilia kolero kontraŭ Judujo, kaj ili reiris al sia
loko kun kolero. 11 Kaj Amacja havis la kuraĝon kaj
kondukis sian popolon kaj iris en la Valon de Salo;
kaj li mortigis el la Seiranoj dek mil; 12 kaj dek mil
vivantajn la Judoj prenis en kaptitecon kaj kondukis
ilin sur la supron de roko, kaj ĵetis ilin malsupren
de la supro de la roko tiel, ke ĉiuj dishakiĝis. 13 Sed
la militistoj, kiujn Amacja sendis returne, por ke ili
ne iru kun li en la militon, kuris en la urbojn de
Judujo, de Samario ĝis Bet-Ĥoron, kaj mortigis tie tri
mil homojn, kaj kaptis multe da rabakiraĵo. 14 Kiam
Amacja revenis post la venkobato de la Edomidoj,
li alportis la diojn de la Seiranoj kaj starigis ilin al
si kiel diojn, kaj antaŭ ili li adorkliniĝis kaj al ili li
incensis. 15 Tiam ekflamis la kolero de la Eternulo
kontraŭ Amacja, kaj Li sendis al li profeton, kaj ĉi tiu
diris al li: Kial vi turnas vin al la dioj de la popolo, kiuj
ne savis sian popolon kontraŭ via mano? 16 Kaj dum li
estis parolanta al li, la reĝo diris al li: Ĉu oni faris vin
konsilisto de la reĝo? ĉesu, ĉar alie oni vin mortigos.
Tiam la profeto ĉesis, kaj diris: Mi scias, ke Dio decidis
pereigi vin; ĉar vi tion faris kaj vi ne aŭskultis mian
konsilon. 17 Amacja, reĝo de Judujo, konsiliĝis, kaj
sendis al Joaŝ, filo de Jehoaĥaz, filo de Jehu, reĝo de
Izrael, por diri: Venu, ni komparu niajn fortojn. 18
Tiam Joaŝ, reĝo de Izrael, sendis al Amacja, reĝo de
Judujo, por diri: La prunelo sur Lebanon sendis al
la cedro sur Lebanon, por diri: Donu vian filinon al
mia filo kiel edzinon. Sed preteriris sovaĝa besto de
Lebanon kaj dispremis per la piedoj la prunelon. 19 Vi
diras al vi: Jen mi venkobatis la Edomidojn; kaj via
koro fieriĝis kaj serĉas gloron. Sidu nun hejme; kial vi
volas entrepreni aferon malfeliĉan, ke vi falu kaj kun
vi ankaŭ Judujo? 20 Sed Amacja ne obeis; ĉar tio estis
de Dio, por transdoni ilin en manojn pro tio, ke ili
turnis sin al la dioj de Edom. 21 Kaj eliris Joaŝ, reĝo de
Izrael, kaj ili komparis siajn fortojn, li kaj Amacja, reĝo
de Judujo, en Bet-Ŝemeŝ, kiu estas en Judujo. 22 Kaj la
Judoj estis venkobatitaj de la Izraelidoj, kaj ili diskuris
ĉiu al sia tendo. 23 Kaj Amacjan, reĝon de Judujo, filon
de Joaŝ, filo de Jehoaĥaz, kaptis Joaŝ, reĝo de Izrael,
en Bet-Ŝemeŝ, kaj venigis lin en Jerusalemon; kaj li
detruis la muregon de Jerusalem, de la Pordego de
Efraim ĝis la Pordego Angula, sur la spaco de kvarcent
ulnoj. 24 Kaj li prenis la tutan oron kaj arĝenton, kaj
ĉiujn vazojn, kiuj troviĝis en la domo de Dio ĉe Obed-
Edom, kaj la trezorojn de la reĝa domo, kaj ankaŭ
garantiulojn, kaj li reiris en Samarion. 25 Kaj Amacja,
filo de Joaŝ, reĝo de Judujo, vivis post la morto de
Joaŝ, filo de Jehoaĥaz, reĝo de Izrael, ankoraŭ dek kvin
jarojn. 26 La cetera historio de Amacja, la unua kaj la
lasta, estas priskribita en la libro de la reĝoj de Judujo
kaj de Izrael. 27 De la tempo, kiam Amacja deturnis
sin de la Eternulo, oni faris kontraŭ li konspiron en
Jerusalem, kaj li forkuris en Laĥiŝon. Sed oni sendis
post li en Laĥiŝon, kaj tie oni lin mortigis. 28 Kaj oni
venigis lin sur ĉevaloj kaj enterigis lin kun liaj patroj
en la urbo de Judujo.

**26** Kaj la tuta Juda popolo prenis Uzijan, kiu havis la
aĝon de dek ses jaroj, kaj faris lin reĝo anstataŭ
lia patro Amacja. 2 Li prikonstruis Elaton kaj revenigis
ĝin al Judujo, post kiam la reĝo ekdormis kun siaj
patroj. 3 La aĝon de dek ses jaroj havis Uzija, kiam li
fariĝis reĝo, kaj kvindek du jarojn li reĝis en Jerusalem.
La nomo de lia patrino estis Jeĥolja, el Jerusalem. 4 Li
agadis bone antaŭ la Eternulo, tiel same, kiel agadis
lia patro Amacja. 5 Li turnadis sin al Dio en la tempo
de Zeĥarja, la kompetentulo en Diaj vizioj; kaj en tiu
tempo, kiam li turnadis sin al la Eternulo, Dio donadis
al li sukceson. 6 Li eliris kaj militis kontraŭ la Filiŝtoj;
li detruis la muregon de Gat, la muregon de Jabne, kaj
la muregon de Aŝdod; kaj li konstruis urbojn en la
regiono de Aŝdod kaj en Filiŝtujo. 7 Kaj Dio helpis
al li kontraŭ la Filiŝtoj, kaj kontraŭ la Araboj, kiuj
loĝis en Gur-Baal, kaj kontraŭ la Meunoj. 8 Kaj la
Amonidoj donis al Uzija donacojn, kaj lia nomo fariĝis
fama ĝis la limo de Egiptujo, ĉar li estis tre forta. 9
Uzija konstruis turojn en Jerusalem super la Pordego
Angula, super la Pordego de la Valo, kaj super la
angulo, kaj fortikigis ilin. 10 Li konstruis ankaŭ turojn

en la dezerto kaj elhakis multe da putoj, ĉar li havis
multe da brutoj sur la malaltaĵo kaj sur la ebenaĵo;
li havis ankaŭ terkultivistojn kaj vinberistojn sur la
montoj kaj kreskotaŭgaj lokoj, ĉar li estis amanto de la
tero. **11** Uzija havis militistaron, kapablan por bataloj,
elirantan en militon per taĉmentoj, laŭ la nombro,
kalkulita de la skribisto Jeiel kaj de la inspektisto
Maaseja, sub kontrolo de Ĥananja, el la altranguloj de
la reĝo. **12** La tuta nombro de la ĉefoj de patrodomoj,
el la bravaj militistoj, estis du mil sescent; **13** kaj sub
ilia regado estis militistaro el tricent sep mil kvincent
povantaj fari militon kun batalkapableco, por helpi al
la reĝo kontraŭ la malamiko. **14** Kaj Uzija pretigis por
ili, por la tuta militistaro, ŝildojn, lancojn, kaskojn,
kirasojn, pafarkojn, kaj ŝtonojn por ŝtonĵetiloj. **15**
Kaj li faris en Jerusalem maŝinojn, elpensitajn de
specialistoj, por ke ili troviĝu sur la turoj kaj sur la
anguloj, por ĵetadi sagojn kaj grandajn ŝtonojn. Kaj
lia nomo fariĝis fama malproksime, ĉar li mirinde
aranĝis al si helpon, ĝis li fariĝis potenca. **16** Sed kiam
li fariĝis potenca, lia koro fieriĝis tiel, ke li malboniĝis.
Li krimis kontraŭ la Eternulo, lia Dio, kaj li eniris en
la templon de la Eternulo, por incensi sur la altaro
de incensado. **17** Kaj eniris post li la pastro Azarja,
kaj kun li okdek pastroj de la Eternulo, kuraĝuloj; **18**
kaj ili stariĝis kontraŭ la reĝo Uzija, kaj diris al li:
Ne vi, Uzija, devas incensi al la Eternulo, sed incensi
devas la pastroj, idoj de Aaron, sanktigitaj; eliru el la
sanktejo, ĉar vi faris krimon, kaj tio ne estos por vi
honora antaŭ Dio, la Eternulo. **19** Tiam Uzija ekkoleris,
kaj en la mano li tenis incensilon, por incensi. Sed
kiam li ekkoleris kontraŭ la pastroj, lepro aperis sur
lia frunto, antaŭ la pastroj en la domo de la Eternulo,
apud la altaro de incensado. **20** Kiam sin turnis al li la
ĉefpastro Azarja kaj ĉiuj pastroj, ili ekvidis, ke li havas
lepron sur la frunto. Kaj ili rapide elkondukis lin de
tie, kaj ankaŭ li mem rapidis eliri, ĉar la Eternulo lin
frapis. **21** Kaj la reĝo Uzija restis lepra ĝis la tago de
sia morto, kaj li loĝis en izolita domo de leprulo; ĉar li
estis forigita for de la domo de la Eternulo. Kaj lia filo
Jotam estis ĉefo de la reĝa domo kaj regis la popolon
de la lando. **22** La ceteran historion de Uzija, la unuan
kaj la lastan, priskribis la profeto Jesaja, filo de Amoc.
**23** Kaj Uzija ekdormis kun siaj patroj, kaj oni enterigis
lin kun liaj patroj sur la kampo de la tomboj de la
reĝoj; ĉar oni diris: Li estas leprulo. Kaj anstataŭ li
ekreĝis lia filo Jotam.

**27** La aĝon de dudek kvin jaroj havis Jotam, kiam
li fariĝis reĝo, kaj dek ses jarojn li reĝis en
Jerusalem. La nomo de lia patrino estis Jeruŝa, filino
de Cadok. **2** Li agadis bone antaŭ la Eternulo, tiel
same, kiel agadis lia patro Uzija; sed li ne eniris en la
templon de la Eternulo; kaj la popolo ĉiam ankoraŭ
pekadis. **3** Li konstruis la supran pordegon de la
domo de la Eternulo, kaj ĉe la muro de Ofel li multe
konstruis. **4** Li konstruis ankaŭ urbojn sur la monto
de Jehuda, kaj en la arbaroj li konstruis kastelojn kaj
turojn. **5** Li militis kontraŭ la reĝo de la Amonidoj kaj
venkis ilin; kaj la Amonidoj donis al li en tiu jaro cent
kikarojn da arĝento, dek mil kor'ojn da tritiko, kaj
dek mil da hordeo. Tion saman donis al li la Amonidoj
ankaŭ en la dua jaro kaj en la tria. **6** Jotam fariĝis
potenca, ĉar li bone aranĝis siajn vojojn antaŭ la
Eternulo, sia Dio. **7** La cetera historio de Jotam, ĉiuj
liaj militoj kaj liaj vojoj, estas priskribitaj en la libro
de la reĝoj de Izrael kaj Judujo. **8** La aĝon de dudek
kvin jaroj li havis, kiam li fariĝis reĝo, kaj dek ses
jarojn li reĝis en Jerusalem. **9** Kaj Jotam ekdormis kun
siaj patroj, kaj oni enterigis lin en la urbo de David.
Kaj anstataŭ li ekreĝis lia filo Aĥaz.

**28** La aĝon de dudek jaroj havis Aĥaz, kiam li fariĝis
reĝo, kaj dek ses jarojn li reĝis en Jerusalem;
kaj li ne agadis bone antaŭ la Eternulo, kiel lia patro
David. **2** Li iradis laŭ la vojoj de la reĝoj de Izrael, kaj li
eĉ faris fanditajn statuojn de Baaloj; **3** li incensadis en
la valo de la filo de Hinom, li bruligis siajn filojn per
fajro, simile al la abomenindaĵoj de la nacioj, kiujn la
Eternulo forpelis de antaŭ la Izraelidoj; **4** li oferadis
kaj incensadis sur la altaĵoj kaj sur la montetoj kaj sub
ĉiu verda arbo. **5** Kaj la Eternulo, lia Dio, transdonis
lin en la manon de la reĝo de Sirio, kaj ili venkobatis
lin, prenis de li multe da kaptitoj kaj forkondukis en
Damaskon. Ankaŭ en la manon de la reĝo de Izrael li
estis transdonita, kaj ĉi tiu faris al li grandan baton. **6**
Pekaĥ, filo de Remalja, mortigis el la Judoj cent dudek
mil en unu tago, kiuj ĉiuj estis homoj bravaj — pro tio,
ke ili forlasis la Eternulon, Dion de iliaj patroj. **7** Kaj
Ziĥri, fortulo el la Efraimidoj, mortigis Maasejan, filon
de la reĝo, kaj Azrikamon, la palacestron, kaj Elkanan,
la duan post la reĝo. **8** Kaj la Izraelidoj forkaptis de
siaj fratoj ducent mil virinojn, filojn, kaj filinojn, kaj
ankaŭ multe da rabaĵo ili prenis de ili kaj venigis la
rabaĵon en Samarion. **9** Tie estis profeto de la Eternulo

kun la nomo Oded. Li eliris antaŭ la militistaron, kiu
venis al Samario, kaj diris al ili: Jen pro la kolero de
la Eternulo, Dio de viaj patroj, kontraŭ la Judoj, Li
transdonis ilin en viajn manojn, kaj vi mortigis ilin
kun tia furiozo, ke tio atingis la ĉielon. 10 Nun la
loĝantojn de Judujo kaj Jerusalem vi intencas subigi
al vi kiel sklavojn kaj sklavinojn. Sed per tio vi fariĝos
ja kulpaj antaŭ la Eternulo, via Dio. 11 Aŭskultu do
min, kaj redonu la kaptitojn, kiujn vi prenis el viaj
fratoj, ĉar ekscitiĝis kontraŭ vi la flamo de kolero de
la Eternulo. 12 Tiam leviĝis kelkaj el la ĉefoj de la
Efraimidoj, Azarja, filo de Jehoĥanan, Bereĥja, filo de
Meŝilemot, Jeĥizkija, filo de Ŝalum, kaj Amasa, filo de
Ĥadlaj, kontraŭ tiuj, kiuj venis el la militistaro, 13 kaj
diris al ili: Ne konduku ĉi tien la kaptitojn, ĉar novan
nian kulpon antaŭ la Eternulo vi intencas aldoni al
niaj pekoj kaj kulpoj; granda estas nia kulpo kaj la
flama kolero kontraŭ Izrael. 14 Tiam la armitoj forlasis
la kaptitojn kaj la rabitaĵon antaŭ la estroj kaj la tuta
komunumo. 15 Kaj leviĝis la viroj, menciitaj laŭ iliaj
nomoj, prenis la kaptitojn, kaj ĉiujn el iliaj nuduloj ili
vestis per parto de la rabitaĵo, vestis ilin, donis al ili
ŝuojn, donis al ili manĝi kaj trinki, ŝmiris ilin per oleo,
sidigis sur azenoj ĉiujn senfortulojn, forkondukis ilin
en Jeriĥon, la urbon de Palmoj, al iliaj fratoj; kaj ili
mem revenis en Samarion. 16 En tiu tempo la reĝo
Aĥaz sendis al la reĝoj de Asirio, ke ili helpu al li. 17
Ankaŭ la Edomidoj venis, venkobatis la Judojn, kaj
forkaptis kaptitojn. 18 Ankaŭ la Filiŝtoj invadis la
urbojn de la malaltaĵo kaj de la sudo de Judujo, kaj
venkoprenis la urbojn Bet-Ŝemeŝ, Ajalon, Gederot,
Soĥo kun ĝiaj filinurboj, Timna kun ĝiaj filinurboj,
kaj Gimzo kun ĝiaj filinurboj, kaj enloĝiĝis tie. 19
Ĉar la Eternulo humiligis Judujon pro Aĥaz, reĝo de
Izrael, kiu malĉastigis Judujon kaj krimis antaŭ la
Eternulo. 20 Kaj venis kontraŭ lin Tiglat-Pileser, reĝo
de Asirio, kaj premis lin, anstataŭ subteni lin; 21 ĉar
Aĥaz prirabis la domon de la Eternulo kaj la reĝan
domon kaj la eminentulojn, kaj donis al la reĝo de
Asirio, tamen tio ne helpis al li. 22 En la tempo de
sia mizero li plue krimis kontraŭ la Eternulo, li, la
reĝo Aĥaz. 23 Kaj li alportadis oferojn al la dioj de la
Damaskanoj, kiuj venkobatis lin, kaj li diris: La dioj
de la reĝoj de Sirio helpas al ili; tial mi oferados al
ili, kaj ili helpos al mi. Sed ili kaŭzis falon al li kaj al
la tuta Izrael. 24 Kaj Aĥaz kolektis ĉiujn vazojn de la
domo de Dio kaj disbatis la vazojn de la domo de Dio,
kaj li ŝlosis la pordojn de la domo de la Eternulo, kaj
faris al si altarojn en ĉiuj anguloj de Jerusalem. 25 Kaj
en ĉiuj urboj de Judujo li faris altaĵojn, por incensi
al aliaj dioj, kaj li kolerigis la Eternulon, Dion de liaj
patroj. 26 Lia cetera historio kaj lia tuta konduto, la
antaŭa kaj la lasta, estas priskribitaj en la libro de
la reĝoj de Judujo kaj Izrael. 27 Kaj Aĥaz ekdormis
kun siaj patroj, kaj oni enterigis lin en la urbo, en
Jerusalem; ĉar oni ne metis lin en la tombojn de la
reĝoj de Izrael. Kaj anstataŭ li ekreĝis lia filoj Ĥizkija.

29 Ĥizkija fariĝis reĝo, havante la aĝon de dudek
kvin jaroj, kaj dudek naŭ jarojn li reĝis en
Jerusalem. La nomo de lia patrino estis Abija, filino
de Zeĥarja. 2 Li agadis bone antaŭ la Eternulo, tiel
same, kiel agadis lia patro David. 3 En la unua jaro
de sia reĝado, en la unua monato, li malŝlosis la
pordojn de la domo de la Eternulo kaj riparis ilin.
4 Kaj li venigis la pastrojn kaj la Levidojn, kolektis
ilin sur la placo orienta, 5 kaj diris al ili: Aŭskultu
min, ho Levidoj! nun vi sanktigu vin, kaj sanktigu la
domon de la Eternulo, Dio de viaj patroj, kaj elĵetu la
malpuraĵon el la sanktejo. 6 Ĉar niaj patroj krimis,
agadis malbone antaŭ la Eternulo, nia Dio, forlasis Lin,
forturnis sian vizaĝon de la loĝejo de la Eternulo, kaj
turnis al ĝi sian dorson. 7 Ili ankaŭ ŝlosis la pordojn
de la portiko, estingis la lucernojn, incensojn ili ne
incensis, kaj bruloferojn ili ne faris en la sanktejo
al Dio de Izrael. 8 Kaj ekkoleris la Eternulo kontraŭ
Judujo kaj Jerusalem; kaj Li elmetis ilin al teruro,
ruinigo, kaj mokado, kiel vi vidas per viaj okuloj. 9 Kaj
jen niaj patroj falis de glavo, kaj niaj filoj, filinoj, kaj
edzinoj estas pro tio en kaptiteco. 10 Nun mi intencas
fari interligon kun la Eternulo, Dio de Izrael, por ke Li
forigu de ni la flamon de Sia kolero. 11 Miaj infanoj,
nun ne estu malzorgaj, ĉar vin elektis la Eternulo,
ke vi staru antaŭ Li, ke vi servu al Li, kaj ke vi estu
por Li servantoj kaj incensantoj. 12 Tiam leviĝis la
Levidoj: Maĥat, filo de Amasaj, Joel, filo de Azarja,
el la Kehatidoj; kaj el la Merariidoj: Kiŝ, filo de Abdi,
Azarja, filo de Jehalelel; kaj el la Gerŝonidoj: Joaĥ, filo
de Zima, kaj Eden, filo de Joaĥ; 13 kaj el la idoj de
Elicafan: Ŝimri kaj Jeiel; kaj el la idoj de Asaf: Zeĥarja
kaj Matanja; 14 kaj el la idoj de Heman: Jeĥiel kaj
Ŝimei; kaj el la idoj de Jedutun: Ŝemaja kaj Uziel. 15
Kaj ili kolektis siajn fratojn kaj sanktigis sin; kaj ili
eniris, laŭ la ordono de la reĝo, konforme al la vortoj

de la Eternulo, por purigi la domon de la Eternulo.
16 Kaj la pastroj eniris en la internon de la domo de
la Eternulo, por purigi; kaj ĉion malpuran, kion ili
trovis en la templo de la Eternulo, ili elportis sur la
korton de la domo de la Eternulo; kaj tion prenis la
Levidoj, por elporti eksteren, al la torento Kidron. 17
Ili komencis la sanktigadon en la unua tago de la unua
monato, kaj en la oka tago de la monato ili eniris en
la portikon de la Eternulo; ili sanktigis la domon de
la Eternulo dum ok tagoj, kaj en la dek-sesa tago de
la unua monato ili finis. 18 Kaj ili eniris internen al
la reĝo Ĥizkija, kaj diris: Ni purigis la tutan domon
de la Eternulo, kaj la altaron de bruloferoj kaj ĉiujn
ĝiajn vazojn, kaj la tablon de la panoj de propono kaj
ĉiujn ĝiajn vazojn; 19 kaj ĉiujn vazojn, kiujn la reĝo
Aĥaz dum sia reĝado malpurigis per siaj krimoj, ni
pretigis kaj sanktigis, kaj jen ili estas antaŭ la altaro
de la Eternulo. 20 La reĝo Ĥizkija leviĝis frue matene,
kunvenigis la estrojn de la urbo, kaj iris en la domon
de la Eternulo. 21 Kaj ili alkondukis sep bovojn, sep
virŝafojn, sep ŝafidojn, kaj sep kaprojn, kiel pekoferon
pro la regno, pro la sanktejo, kaj pro Judujo; kaj li
ordonis al la Aaronidoj, la pastroj, fari bruloferon sur
la altaro de la Eternulo. 22 Kaj oni buĉis la bovojn, kaj
la pastroj prenis la sangon kaj aspergis la altaron;
kaj oni buĉis la virŝafojn kaj aspergis per la sango la
altaron; kaj oni buĉis la ŝafidojn kaj aspergis per la
sango la altaron. 23 Kaj oni alkondukis la propekajn
kaprojn antaŭ la reĝon kaj la komunumon, kaj ili
metis siajn manojn sur ilin. 24 Kaj la pastroj ilin buĉis,
kaj senpekigis per ilia sango la altaron, por pekliberigi
la tutan Izraelon; ĉar pro la tuta Izrael, diris la reĝo,
estas la brulofero kaj la pekofero. 25 Kaj li starigis
la Levidojn en la domo de la Eternulo kun cimbaloj,
psalteroj, kaj harpoj, laŭ la preskribo de David, de
Gad, la viziisto de la reĝo, kaj de la profeto Natan; ĉar
de la Eternulo estis tiu preskribo per Liaj profetoj. 26
Kaj stariĝis la Levidoj kun la instrumentoj de David,
kaj la pastroj kun la trumpetoj. 27 Kaj Ĥizkija ordonis,
ke oni faru la bruloferon sur la altaro. Kaj en la
momento, kiam komenciĝis la brulofero, komenciĝis
la kantado al la Eternulo, akompanata de trumpetoj
kaj de instrumentoj de David, reĝo de Izrael. 28 Kaj la
tuta popolo adorkliniĝis, kaj la kantado de la kantistoj
kaj la trumpetado de la trumpetistoj daŭris ĝis la
fino de la brulofero. 29 Kiam la brulofero estis finita,
la reĝo, kaj ĉiuj, kiuj troviĝis kun li, ekgenuis kaj
adorkliniĝis. 30 Kaj la reĝo Ĥizkija kaj la estroj diris
al la Levidoj, ke ili gloru la Eternulon per la vortoj
de David kaj de la viziisto Asaf; kaj ili glorkantis kun
ĝojo, fleksis sin, kaj adorkliniĝis. 31 Kaj Ĥizkija diris
plue: Nun vi konsekris vin al la Eternulo; aliru kaj
konduku buĉoferojn kaj dankoferojn al la domo de la
Eternulo. Kaj la komunumo alkondukis buĉoferojn kaj
dankoferojn kaj memvolajn bruloferojn. 32 La nombro
de la bruloferoj, kiujn la komunumo alkondukis, estis:
sepdek bovoj, cent virŝafoj, ducent ŝafidoj; ĉio ĉi tio
estis bruloferoj al la Eternulo. 33 Da konsekritaj estis:
sescent bovoj kaj tri mil ŝafoj. 34 Sed la nombro de la
pastroj estis tro malgranda, kaj ili ne povis senfeligi
ĉiujn bruloferojn; tial helpis al ili iliaj fratoj, la Levidoj,
ĝis la laboro estis finita kaj ĝis la pastroj sin sanktigis;
ĉar la Levidoj estis pli fervoraj en la sinsanktigado,
ol la pastroj. 35 Ankaŭ tre multe estis da bruloferoj,
kun la sebo de pacoferoj kaj kun verŝoferoj por la
bruloferoj. Tiamaniere estis preta la servado en la
domo de la Eternulo. 36 Kaj ĝojis Ĥizkija kaj la tuta
popolo pri tio, kion Dio pretigis por la popolo; ĉar
neatendita estis la afero.

30 Ĥizkija sendis al la tuta Izrael kaj Jehuda, li
skribis ankaŭ leterojn al Efraim kaj Manase, ke
ili venu en la domon de la Eternulo, en Jerusalemon,
por fari Paskon al la Eternulo, Dio de Izrael. 2 Kaj la
reĝo kaj liaj eminentuloj kaj la tuta komunumo en
Jerusalem per konsiliĝo decidis fari la Paskon en la
dua monato; 3 ĉar ili ne povis fari ĝin en tiu tempo
pro tio, ke la pastroj ne sanktigis sin en sufiĉa nombro
kaj la popolo ne kolektiĝis en Jerusalem. 4 La afero
plaĉis al la reĝo kaj al la tuta komunumo. 5 Kaj ili
decidis proklami en la tuta lando de Izrael, de Beer-
Ŝeba ĝis Dan, ke oni venu fari Paskon al la Eternulo,
Dio de Izrael, en Jerusalem; ĉar jam delonge oni ne
faris ĝin, kiel estas skribite. 6 Kaj ekiris kurieroj kun
leteroj de la reĝo kaj de liaj eminentuloj en la tutan
landon de Izrael kaj Jehuda, kun jena ordono de la
reĝo: Ho idoj de Izrael, revenu al la Eternulo, Dio de
Abraham, Isaak, kaj Izrael, kaj tiam Li revenos al la
saviĝintoj, kiuj restis ĉe vi de la mano de la reĝoj de
Asirio. 7 Kaj ne estu kiel viaj patroj kaj viaj fratoj,
kiuj krimis kontraŭ la Eternulo, Dio de iliaj patroj, kaj
kiujn Li tial elmetis al ruinigo, kiel vi vidas. 8 Nun
ne estu malmolnukaj kiel viaj patroj: donu la manon
al la Eternulo, kaj venu en Lian sanktejon, kiun Li

sanktigis por ĉiam, kaj servu al la Eternulo, via Dio,
kaj Li deturnos de vi la flamon de Sia kolero. 9 Ĉar
se vi revenos al la Eternulo, viaj fratoj kaj viaj filoj
trovos favorkorecon ĉe tiuj, kiuj ilin forkaptis, kaj
povos reveni en ĉi tiun landon; ĉar kompatema kaj
favorkora estas la Eternulo, via Dio, kaj Li ne deturnos
de vi Sian vizaĝon, se vi revenos al Li. 10 La kurieroj
iris de urbo al urbo en la lando de Efraim kaj Manase
kaj ĝis la lando de Zebulun; sed oni ridis pri ili kaj
mokis ilin. 11 Nur kelkaj el la Aŝeridoj, Manaseidoj,
kaj Zebulunidoj humiliĝis, kaj venis en Jerusalemon.
12 Super Judujo estis la mano de Dio, por doni al ili
unuanimecon, por plenumi la ordonon de la reĝo kaj
de la eminentuloj konforme al la vorto de la Eternulo.
13 Kaj kolektiĝis en Jerusalem multe da popolo, por
fari la feston de macoj en la dua monato, tre granda
homamaso. 14 Kaj ili leviĝis, kaj forigis la altarojn,
kiuj estis en Jerusalem; kaj ĉion, sur kio oni faradis
incensadon, ili forigis kaj ĵetis en la torenton Kidron.
15 Kaj ili buĉis la Paskon en la dek-kvara tago de
la dua monato. La pastroj kaj la Levidoj hontis, kaj
sanktigis sin kaj venigis la bruloferojn al la domo de
la Eternulo. 16 Kaj ili staris sur siaj postenoj laŭ la
preskribo, konforme al la instruo de Moseo, la homo
de Dio. La pastroj aspergis per la sango el la manoj
de la Levidoj. 17 Ĉar en la komunumo estis multaj,
kiuj sin ne sanktigis, tial la Levidoj okupis sin per la
buĉado de la Paskoj anstataŭ ĉiu, kiu ne estis pura, por
esti sanktigata al la Eternulo. 18 Multaj el la popolo,
plejparte el Efraim, Manase, Isaĥar, kaj Zebulun, ne
purigis sin; tamen ili manĝis la Paskon, ne konforme
al la preskribo; sed Ĥizkija preĝis pri ili, dirante: La
Eternulo, la bona, pardonu ĉiun, 19 kiu pretigis sian
koron, por turni sin al Dio, la Eternulo, Dio de liaj
patroj, kvankam ne konforme al la sankta puriĝo.
20 Kaj la Eternulo aŭskultis Ĥizkijan kaj pardonis la
popolon. 21 Kaj la Izraelidoj, kiuj troviĝis en Jerusalem,
faris la feston de macoj dum sep tagoj en granda
ĝojo; kaj ĉiutage la Levidoj kaj la pastroj glorkantis al
la Eternulo per instrumentoj, difinitaj por glorado
de la Eternulo. 22 Kaj Ĥizkija parolis afable al ĉiuj
Levidoj, kiuj distingiĝis en la servado al la Eternulo.
Kaj oni manĝis la festan manĝaĵon dum sep tagoj,
alportante pacoferojn, kaj dankante la Eternulon, Dion
de iliaj patroj. 23 Kaj la tuta komunumo interkonsiliĝe
decidis festi aliajn sep tagojn, kaj ili pasigis la sep
tagojn en gajeco. 24 Ĉar Ĥizkija, reĝo de Judujo, donis
por la popolo mil bovojn kaj sep mil ŝafojn, kaj la
eminentuloj donis al la popolo mil bovojn kaj dek mil
ŝafojn; kaj jam tre multaj el la pastroj sin sanktigis. 25
Kaj ĝojis la tuta komunumo de la Judoj kaj la pastroj
kaj la Levidoj, kaj la tuta popolamaso, kiu venis de
Izrael, kaj la aligentuloj, kiuj venis el la lando de Izrael
kaj kiuj loĝis en Judujo. 26 Kaj estis granda ĝojo en
Jerusalem; ĉar de la tempo de Salomono, filo de David,
reĝo de Izrael, ne estis io simila en Jerusalem. 27 Kaj
leviĝis la pastroj kaj la Levidoj kaj benis la popolon;
kaj aŭskultita estis ilia voĉo, kaj venis ilia preĝo en
Lian sanktan loĝejon, en la ĉielon.

31 Kiam ĉio ĉi tio finiĝis, ĉiuj Izraelidoj, kiuj
tie troviĝis, eliris en la urbojn de Judujo, kaj
disrompis la statuojn, dishakis la sanktajn stangojn,
kaj detruis la altaĵojn kaj la altarojn en la tuta Judujo
kaj en la regionoj de Benjamen, de Efraim, kaj de
Manase, ĝis plena ekstermo. Kaj reiris ĉiuj Izraelidoj
ĉiu al sia posedaĵo, al siaj urboj. 2 Kaj Ĥizkija starigis
la grupojn de la pastroj kaj de la Levidoj laŭ ilia ordo,
ĉiun laŭ ĝia destino, la pastrojn kaj la Levidojn por
la bruloferoj kaj por la pacoferoj, por servado, por
laŭdkantado kaj glorkantado, ĉe la pordegoj de la
tendaro de la Eternulo. 3 Kaj la reĝo destinis parton el
sia havaĵo por bruloferoj: por la bruloferoj matenaj kaj
vesperaj, por la bruloferoj sabataj, monatkomencaj,
kaj festaj, kiel estas skribite en la instruo de la
Eternulo. 4 Kaj li ordonis al la popolo, kiu loĝis en
Jerusalem, donadi vivrimedojn al la pastroj kaj al la
Levidoj, por ke ili povu fordoni sin al la instruo de la
Eternulo. 5 Kiam ĉi tiu ordono disvastiĝis, la Izraelidoj
alportis multe da unuaaĵoj el greno, mosto, oleo, kaj
mielo, kaj diversajn kampajn produktaĵojn, kaj ankaŭ
dekonaĵojn el ĉio ili multe alportis. 6 Kaj la Izraelidoj
kaj la Judoj, kiuj loĝis en la urboj de Judujo, ankaŭ
alportis dekonaĵon el bovoj kaj ŝafoj, kaj dekonaĵon
sanktan, konsekritan al la Eternulo, ilia Dio; kaj ili
amasigis grandajn amasojn. 7 En la tria monato oni
komencis la aranĝadon de la amasoj, kaj en la sepa
monato oni finis. 8 Kiam Ĥizkija kaj la estroj venis
kaj ekvidis la amasojn, ili benis la Eternulon kaj Lian
popolon Izrael. 9 Kaj Ĥizkija demandis la pastrojn kaj
la Levidojn pri la amasoj. 10 Kaj respondis al li Azarja,
la ĉefpastro, el la domo de Cadok, kaj diris: De la
momento, kiam oni komencis portadi la donojn en la
domon de la Eternulo, oni manĝis kaj satiĝis, kaj restis

ankoraŭ multe; ĉar la Eternulo benis Sian popolon;
el la restaĵo kolektiĝis ĉi tiu amasego. **11** Kaj Ĥizkija
ordonis pretigi ĉambrojn ĉe la domo de la Eternulo.
Kaj oni pretigis. **12** Kaj oni transportis tien la donojn,
la dekonaĵojn, kaj la konsekritaĵojn kun fideleco. Estro
super tio estis Konanja, la Levido, kaj lia frato Ŝimei
estis la dua post li. **13** Kaj Jeĥiel, Azazja, Naĥat, Asahel,
Jerimot, Jozabad, Eliel, Jiŝmaĥja, Maĥat, kaj Benaja
estis oficistoj apud Konanja kaj lia frato Ŝimei, laŭ
ordono de la reĝo Ĥizkija, kaj de Azarja, estro en la
domo de Dio. **14** Kore, filo de Jimna, Levido pordegisto
ĉe la flanko orienta, estis super la memvolaj donoj al
Dio, super la oferdonoj, alportataj al la Eternulo, kaj
super la plejsanktaĵoj. **15** Liaj helpantoj estis Eden,
Minjamin, Jeŝua, Ŝemaja, Amarja, kaj Ŝeĥanja, en la
urboj de la pastroj, por fidele disdonadi al siaj fratoj
laŭgrupe, al la grandaj kaj al la malgrandaj **16** (krom
la registritaj virseksuloj, havantaj la aĝon de tri jaroj
kaj pli, de ĉiuj, kiuj iradis ĉiutage en la domon de la
Eternulo laŭ siaj oficoj kaj grupoj), **17** al la registritaj
pastroj, laŭ iliaj patrodomoj, kaj al la Levidoj, havantaj
la aĝon de dudek jaroj kaj pli, laŭ iliaj oficoj kaj grupoj,
**18** al la registritoj kun ĉiuj iliaj malgrandaj infanoj,
edzinoj, filoj, kaj filinoj, al la tuta komunumo, por ke
ili fidele dediĉu sin al la sanktaj aferoj. **19** Kaj por la
Aaronidoj, la pastroj, sur la antaŭurbaj kampoj de iliaj
urboj, de ĉiu urbo, la nomitaj viroj estis destinitaj,
por doni partojn al ĉiu virseksulo inter la pastroj kaj
al ĉiu registrito inter la Levidoj. **20** Tion faris Ĥizkija
en la tuta Judujo, kaj li agadis bone, juste, kaj vere
antaŭ la Eternulo, lia Dio. **21** Kaj en ĉiuj faroj, kiujn li
entreprenis koncerne la servadon en la domo de Dio,
la instruon kaj la ordonon pri la sinturnado al sia Dio,
li agadis el la tuta koro, kaj li havis sukceson.

**32** Post tiuj aferoj kaj veraĵoj venis Sanĥerib, reĝo de
Asirio; li venis en Judujon, eksieĝis la fortikigitajn
urbojn, kaj intencis forŝiri ilin al si. **2** Kiam Ĥizkija
vidis, ke Sanĥerib venis kaj intencas militi kontraŭ
Jerusalem, **3** li konsiliĝis kun siaj eminentuloj kaj
fortuloj, kaj decidis ŝutkovri la akvon de la fontoj,
kiuj estis ekster la urbo; kaj ili helpis al li. **4** Kaj
kolektiĝis multe da popolo, kaj ili ŝutkovris ĉiujn
fontojn, kaj la torenton, kiu fluas meze de la lando,
ĉar ili diris: Por kio permesi, ke la reĝoj de Asirio,
veninte, trovu multe da akvo? **5** Kaj li estis kuraĝa,
kaj li prikonstruis la tutan difektiĝintan muregon,
li plialtigis la turojn, kaj konstruis ekstere ankoraŭ
alian muregon, kaj li fortikigis Milon apud la urbo
de David, kaj pretigis multe da bataliloj kaj da ŝildoj.
**6** Kaj li starigis militestrojn super la popolo, kaj li
kunvenigis ilin al si sur la placon antaŭ la pordego de
la urbo, kaj vigligis ilian koron, dirante: **7** Estu kuraĝaj
kaj fortaj, ne timu, kaj ne sentu teruron antaŭ la
reĝo de Asirio kaj antaŭ la tuta homamaso, kiu estas
kun li, ĉar kun ni estas pli, ol kun li: **8** kun li estas
brako karna, sed kun ni estas la Eternulo, nia Dio, por
helpi al ni kaj por batali en niaj bataloj. Kaj la popolo
vigliĝis de la vortoj de Ĥizkija, reĝo de Judujo. **9** Post
tio Sanĥerib, reĝo de Asirio, sendis siajn servantojn
en Jerusalemon (li mem estis ĉe Laĥiŝ kune kun sia
tuta militistaro) al Ĥizkija, reĝo de Judujo, kaj al ĉiuj
Judoj en Jerusalem, por diri: **10** Tiele diras Sanĥerib,
reĝo de Asirio: Kion vi fidas, loĝante en la fortikaĵo de
Jerusalem? **11** Ĥizkija trompis vin, por mortigi vin de
malsato kaj soifo, se li diras al vi: La Eternulo, nia Dio,
savos nin el la mano de la reĝo de Asirio. **12** Li mem,
Ĥizkija, forigis ja Liajn altaĵojn kaj Liajn altarojn, kaj
ordonis al Judujo kaj Jerusalem, dirante: Antaŭ unu
sola altaro adorkliniĝu kaj sur ĝi incensu. **13** Ĉu vi ne
scias, kion mi kaj miaj patroj faris al ĉiuj popoloj de la
landoj? Ĉu la dioj de la nacioj de la landoj povis savi
ilian landon el mia mano? **14** Kiu el ĉiuj dioj de tiuj
nacioj, kiujn miaj patroj ekstermis, povis savi sian
popolon el mia mano, ke via Dio povus savi vin el
mia mano? **15** Ĥizkija do ne trompu vin kaj ne logu
vin tiamaniere, kaj vi ne kredu al li. Se neniu dio
de iu ajn nacio kaj regno povis savi sian popolon el
mia mano kaj el la mano de miaj patroj, ankaŭ viaj
dioj ne savos vin el mia mano. **16** Kaj ankoraŭ pli liaj
servantoj parolis kontraŭ Dio, la Eternulo, kaj kontraŭ
Lia servanto Ĥizkija. **17** Kaj leterojn li skribis, por
insulti la Eternulon, Dion de Izrael, kaj dirante pri Li
tiele: Kiel la dioj de la nacioj de la landoj ne savis sian
popolon el mia mano, tiel ankaŭ la Dio de Ĥizkija ne
savos Sian popolon el mia mano. **18** Kaj ili kriis per
laŭta voĉo en la Juda lingvo al la popolo Jerusalema,
kiu estis sur la murego, por timigi ĝin kaj senkuraĝigi
ĝin, por ke ili povu venkopreni la urbon. **19** Kaj ili
parolis pri Dio de Jerusalem tiel, kiel pri la dioj de la
popoloj de la tero, faritaĵo de homaj manoj. **20** Sed
la reĝo Ĥizkija, kaj la profeto Jesaja, filo de Amoc,
ekpreĝis pri tio kaj kriis al la ĉielo. **21** Kaj la Eternulo
sendis anĝelon, kaj li ekstermis ĉiujn fortulojn kaj

eminentulojn kaj estrojn en la tendaro de la reĝo de
Asirio. Kaj ĉi tiu revenis kun honto en sian landon;
kaj kiam li eniris en la domon de sia dio, homoj, kiuj
elvenis el liaj propraj lumboj, faligis lin per glavo. 22
Tiamaniere la Eternulo savis Ĥizkijan kaj la loĝantojn
de Jerusalem el la mano de Sanĥerib, reĝo de Asirio,
kaj el la manoj de ĉiuj; kaj Li gardis ilin ĉirkaŭe. 23
Tiam multaj alportadis donacojn al la Eternulo en
Jerusalemon, kaj multekostajn objektojn al Ĥizkija,
reĝo de Judujo. Kaj post tio li altiĝis en la okuloj de
ĉiuj nacioj. 24 En tiu tempo Ĥizkija morte malsaniĝis.
Kaj li preĝis al la Eternulo. Ĉi Tiu parolis al li kaj donis
al li pruvosignon. 25 Ĥizkija ne repagis konforme al
tio, kio estis farita por li; lia koro fieriĝis. Kaj ekscitiĝis
kolero kontraŭ li kaj kontraŭ Judujo kaj Jerusalem. 26
Sed Ĥizkija humiliĝis pri la fieriĝo de sia koro, li kaj la
loĝantoj de Jerusalem; tial ne trafis lin la kolero de la
Eternulo en la tempo de Ĥizkija. 27 Ĥizkija havis tre
multe da riĉeco kaj honoro; kaj li faris al si trezorejojn
por arĝento kaj oro, por multekostaj ŝtonoj, aromaĵoj,
ŝildoj, kaj ĉiaj valoraj objektoj, 28 ankaŭ provizejojn
por la produktaĵoj: greno, mosto, oleo, kaj stalojn por
ĉiaspecaj brutoj, kaj ŝafejojn por la ŝafoj. 29 Kaj urbojn
li konstruis al si. Kaj da ŝafoj kaj bovoj li havis multe,
ĉar Dio donis al li tre grandan havaĵon. 30 Li, Ĥizkija,
ŝtopkovris la supran fonton de Giĥon kaj direktis ĝin
malsupren al la okcidenta flanko de la urbo de David.
Kaj Ĥizkija havis sukceson en ĉiu sia faro. 31 Nur kiam
la senditoj de la princoj de Babel estis senditaj al
li, por demandi lin pri la signomiraklo, kiu aperis
en la lando, Dio lin forlasis, por elprovi lin, por scii
ĉion, kion li havis en sia koro. 32 La cetera historio de
Ĥizkija kaj liaj virtoj estas priskribitaj en la vizio de la
profeto Jesaja, filo de Amoc, en la libro de la reĝoj
de Judujo kaj de Izrael. 33 Kaj Ĥizkija ekdormis kun
siaj patroj, kaj oni enterigis lin en la plej alta loko de
la tomboj de la idoj de David; kaj honoron faris al li
post lia morto ĉiuj Judoj kaj loĝantoj de Jerusalem.
Kaj anstataŭ li ekreĝis lia filo Manase.

**33** La aĝon de dek du jaroj havis Manase, kiam li
fariĝis reĝo, kaj kvindek kvin jarojn li reĝis en
Jerusalem. 2 Li agadis malbone antaŭ la Eternulo,
simile al la abomenindaĵoj de la nacioj, kiujn la
Eternulo forpelis de antaŭ la Izraelidoj. 3 Li konstruis
denove la altaĵojn, kiujn detruis lia patro Ĥizkija;
kaj li starigis altarojn al la Baaloj, faris sanktajn
stangojn, kaj adorkliniĝis antaŭ la tuta armeo de la
ĉielo kaj servis al ĝi. 4 Li konstruis ankaŭ altarojn
en la domo de la Eternulo, pri kiu la Eternulo diris:
En Jerusalem estos Mia nomo eterne. 5 Li konstruis
altarojn al la tuta armeo de la ĉielo, sur la du kortoj
de la domo de la Eternulo. 6 Li ankaŭ trairigis siajn
filojn tra fajro en la valo de la filo de Hinom, li
esploradis la estontecon, aŭguradis, sorĉadis, starigis
antaŭdiristojn kaj magiistojn; li multe agadis malbone
antaŭ la Eternulo, kolerigante Lin. 7 La skulptaĵon de
la idolo, kiun li faris, li starigis en la domo de Dio, pri
kiu Dio diris al David kaj al lia filo Salomono: En ĉi
tiu domo kaj en Jerusalem, kiun Mi elektis inter ĉiuj
triboj de Izrael, Mi estigos Mian nomon por eterne;
8 kaj Mi ne plu foririgos la piedon de Izrael de sur
la tero, kiun Mi destinis por viaj patroj, se ili nur
observos por plenumi ĉion, kion Mi ordonis al ili, la
tutan instruon, leĝojn, kaj preskribojn, donitajn per
Moseo. 9 Manase delogis la Judojn kaj la loĝantojn
de Jerusalem en tia grado, ke ili agadis pli malbone,
ol tiuj nacioj, kiujn la Eternulo ekstermis antaŭ la
Izraelidoj. 10 La Eternulo parolis al Manase kaj al lia
popolo, sed ili ne aŭskultis. 11 Kaj la Eternulo venigis
sur ilin la militestrojn de la reĝo de Asirio; kaj ili
malliberigis Manasen per katenoj, ligis lin per ĉenoj,
kaj forkondukis lin en Babelon. 12 En sia mizero li
ekpetegis la Eternulon, sian Dion, kaj li tre humiliĝis
antaŭ la Dio de siaj patroj. 13 Kiam li preĝis al Li kaj
petegis Lin, Li aŭskultis lian peton kaj revenigis lin
en Jerusalemon al lia regno. Kaj Manase eksciis, ke
la Eternulo estas la vera Dio. 14 Post tio li konstruis
eksteran muregon por la urbo de David okcidente
de Giĥon, en la valo, ĝis la enirejo de la Pordego de
Fiŝoj, ĉirkaŭ Ofel, kaj li faris ĝin tre alta. Kaj li starigis
militestrojn en ĉiuj fortikigitaj urboj de Judujo. 15 Li
forigis la fremdajn diojn kaj la idolon el la domo de la
Eternulo, ankaŭ ĉiujn altarojn, kiujn li konstruis sur la
monto de la domo de la Eternulo kaj en Jerusalem; kaj
li elĵetis tion eksteren de la urbo. 16 Kaj li rekonstruis
la altaron de la Eternulo kaj faris sur ĝi pacoferojn kaj
dankoferojn, kaj li ordonis al la Judoj, ke ili servadu al
la Eternulo, Dio de Izrael. 17 Tamen la popolo ĉiam
ankoraŭ oferadis sur la altaĵoj, sed nur al la Eternulo,
sia Dio. 18 La cetera historio de Manase, lia preĝo
al lia Dio, kaj la vortoj de la viziistoj, kiuj parolis al
li en la nomo de la Eternulo, Dio de Izrael, troviĝas
en la kroniko de la reĝoj de Izrael. 19 Lia preĝo kaj

aŭskultiteco, ĉiuj liaj pekoj kaj krimoj, kaj la lokoj, sur
kiuj li konstruis altaĵojn kaj starigis sanktajn stangojn
kaj idolojn antaŭ sia humiliĝo, estas priskribitaj en
la kroniko de la viziistoj. 20 Kaj Manase ekdormis
kun siaj patroj, kaj oni enterigis lin en lia domo. Kaj
anstataŭ li ekreĝis lia filo Amon. 21 La aĝon de dudek
du jaroj havis Amon, kiam li fariĝis reĝo, kaj du jarojn
li reĝis en Jerusalem. 22 Li agadis malbone antaŭ
la Eternulo, kiel agadis lia patro Manase; kaj al ĉiuj
idoloj, kiujn faris lia patro Manase, Amon oferadis
kaj servadis. 23 Li ne humiliĝis antaŭ la Eternulo,
kiel humiliĝis lia patro Manase, sed li, Amon, multe
kulpiĝis. 24 Kaj konspiris kontraŭ li liaj servantoj kaj
mortigis lin en lia domo. 25 Sed la popolo de la lando
mortigis ĉiujn, kiuj faris konspiron kontraŭ la reĝo
Amon; kaj la popolo de la lando faris reĝo anstataŭ li
lian filon Joŝija.

**34** La aĝon de ok jaroj havis Joŝija, kiam li fariĝis
reĝo, kaj tridek unu jarojn li reĝis en Jerusalem.
2 Li agadis bone antaŭ la Eternulo, kaj iradis laŭ la
vojoj de sia patro David, kaj ne deflankiĝis dekstren
nek maldekstren. 3 En la oka jaro de sia reĝado,
estante ankoraŭ knabo, li komencis turnadi sin al
la Dio de sia patro David; kaj en la dek-dua jaro li
komencis purigi Judujon kaj Jerusalemon de la altaĵoj,
sanktaj stangoj, idoloj, kaj fanditaj statuoj. 4 Kaj oni
detruis antaŭ li la altarojn de la Baaloj; la kolonojn
de la suno, kiuj estis super ili, li dehakis; la sanktajn
stangojn, idolojn, kaj statuojn li disbatis, dispecetigis,
kaj disĵetis sur la tombojn de tiuj, kiuj alportadis al
ili oferojn. 5 La ostojn de la pastroj li forbruligis sur
iliaj altaroj; kaj li purigis Judujon kaj Jerusalemon. 6
Ankaŭ en la urboj de Manase, Efraim, Simeon, kaj ĝis
Naftali, en iliaj ruinoj ĉirkaŭe, 7 li detruis la altarojn
kaj la sanktajn stangojn, kaj la idolojn li disbatis en
pecetojn, kaj ĉiujn kolonojn de la suno li dehakis en la
tuta lando de Izrael; kaj li revenis en Jerusalemon. 8
En la dek-oka jaro de sia reĝado, post la purigo de
la lando kaj de la domo, li sendis Ŝafanon, filon de
Acalja, la urbestron Maaseja, kaj la kronikiston Joaĥ,
filo de Joaĥaz, por ripari la domon de la Eternulo,
lia Dio. 9 Kaj ili venis al la ĉefpastro Ĥilkija, kaj
transdonis la arĝenton, alportitan en la domon de
Dio, kaj kolektitan de la Levidoj, la sojlogardistoj, el la
manoj de Manase, Efraim, kaj ĉiuj restintaj Izraelidoj,
ankaŭ de ĉiuj Jehudaidoj kaj Benjamenidoj; kaj ili
revenis en Jerusalemon. 10 Kaj ili donis tion en la
manojn de la laborplenumantoj, kiuj havis komision
en la domo de la Eternulo; kaj ĉi tiuj donis al tiuj,
kiuj laboris en la domo de la Eternulo, rebonigante
kaj riparante la domon. 11 Ili donis al la ĉarpentistoj
kaj konstruistoj, por aĉeti ĉirkaŭhakitajn ŝtonojn kaj
lignon por kunteniloj kaj traboj por la domoj, kiujn
ruinigis la reĝoj de Judujo. 12 Tiuj homoj plenumadis
la laboron honeste; oficon de observistoj super ili
havis Jaĥat kaj Obadja, Levidoj el la Merariidoj, kaj
Zeĥarja kaj Meŝulam el la Kehatidoj; la Levidoj ĉiuj
estis kompetentaj muzikistoj; 13 super la portistoj, kiel
observistoj super ĉiuj laboristoj en ĉiuj laboroj, estis el
la Levidoj la skribistoj, kontrolistoj, kaj pordegistoj. 14
Kiam ili elprenis la arĝenton, kiu estis alportita en la
domon de la Eternulo, la pastro Ĥilkija trovis la libron
de instruo de la Eternulo, donitan per Moseo. 15 Kaj
Ĥilkija ekparolis kaj diris al la skribisto Ŝafan: Libron
de la instruo mi trovis en la domo de la Eternulo; kaj
Ĥilkija donis la libron al Ŝafan. 16 Kaj Ŝafan alportis la
libron al la reĝo, kaj li ankaŭ raportis al la reĝo jene:
Ĉion, kio estas komisiita al viaj servantoj, ili faras.
17 Oni elŝutis la arĝenton, trovitan en la domo de la
Eternulo, kaj donis ĝin en la manojn de la oficistoj kaj
de la laboristoj. 18 Kaj la skribisto Ŝafan raportis al la
reĝo, dirante: Libron donis al mi la pastro Ĥilkija. Kaj
Ŝafan legis el ĝi antaŭ la reĝo. 19 Kiam la reĝo aŭdis la
vortojn de la instruo, li disŝiris siajn vestojn. 20 Kaj la
reĝo ordonis al Ĥilkija, Aĥikam, filo de Ŝafan, Abdon,
filo de Miĥa, la skribisto Ŝafan, kaj Asaja, servanto de
la reĝo, dirante: 21 Iru, demandu la Eternulon por mi
kaj por la restintoj el Izrael kaj Jehuda, pri la vortoj
de la trovita libro; ĉar granda estas la kolero de la
Eternulo, elverŝiĝinta sur nin pro tio, ke niaj patroj ne
observis la vorton de la Eternulo, por plenumi ĉion,
kio estas skribita en ĉi tiu libro. 22 Kaj iris Ĥilkija,
kaj tiuj, kiuj estis ĉe la reĝo, al la profetino Ĥulda,
edzino de Ŝalum, filo de Tokhat, filo de Ĥasra, la
vestogardisto (ŝi loĝis en Jerusalem, en la dua parto);
kaj ili parolis kun ŝi pri tio. 23 Kaj ŝi diris al ili: Tiele
diras la Eternulo, Dio de Izrael: Diru al la homo, kiu
sendis vin al mi: 24 Tiele diras la Eternulo: Jen Mi
venigos malfeliĉon sur ĉi tiun lokon kaj sur ĝiajn
loĝantojn, ĉiujn malbenojn, skribitajn en la libro, kiun
oni legis antaŭ la reĝo de Judujo. 25 Pro tio, ke ili Min
forlasis kaj incensis al aliaj dioj, kolerigante Min per
ĉiuj faroj de siaj manoj, ekflamis Mia kolero kontraŭ ĉi

tiu loko, kaj ĝi ne estingiĝos. 26 Kaj koncerne la reĝon
de Judujo, kiu sendis vin, por demandi la Eternulon,
diru al li jene: Tiele diras la Eternulo, Dio de Izrael, pri
la vortoj, kiujn vi aŭdis: 27 Ĉar via koro moliĝis kaj vi
humiliĝis antaŭ Dio, kiam vi aŭdis Liajn vortojn pri ĉi
tiu loko kaj pri ĝiaj loĝantoj, kaj vi humiliĝis antaŭ Mi,
disŝiris viajn vestojn, kaj ploris antaŭ Mi: tial Mi ankaŭ
aŭskultis vin, diras la Eternulo. 28 Jen Mi alkolektos
vin al viaj patroj, kaj vi iros en vian tombon en paco,
kaj viaj okuloj ne vidos la tutan malfeliĉon, kiun Mi
venigos sur ĉi tiun lokon kaj sur ĝiajn loĝantojn. Kaj ili
alportis la respondon al la reĝo. 29 La reĝo sendis, kaj
kunvenigis ĉiujn plejaĝulojn de Judujo kaj Jerusalem.
30 Kaj la reĝo iris en la domon de la Eternulo, kaj kune
kun li ĉiuj Judoj kaj loĝantoj de Jerusalem, la pastroj
kaj la Levidoj, kaj la tuta popolo, de la grandaj ĝis la
malgrandaj; kaj oni voĉlegis antaŭ ili ĉiujn vortojn de
la libro de interligo, kiu estis trovita en la domo de la
Eternulo. 31 Kaj la reĝo stariĝis sur sia loko, kaj faris
interligon antaŭ la Eternulo, por sekvi la Eternulon,
kaj observi Liajn ordonojn, decidojn, kaj leĝojn, per
sia tuta koro kaj per sia tuta animo, por plenumi la
vortojn de la interligo, skribitajn en tiu libro. 32 Kaj li
aligis al tio ĉiujn, kiuj troviĝis en Jerusalem kaj en
la lando de Benjamen. Kaj la loĝantoj de Jerusalem
agadis laŭ la interligo de Dio, Dio de iliaj patroj. 33 Kaj
Joŝija forigis ĉiujn abomenindaĵojn el ĉiuj regionoj,
kiuj apartenis al la Izraelidoj; kaj ĉiujn, kiuj troviĝis
en Izrael, li devigis servi al la Eternulo, ilia Dio. Dum
lia tuta vivo ili ne defalis de la Eternulo, Dio de iliaj
patroj.

**35** Joŝija faris en Jerusalem Paskon al la Eternulo,
kaj oni buĉis la Paskon en la dek-kvara tago de la
unua monato. 2 Li starigis la pastrojn sur iliaj postenoj
kaj vigligis ilin por la servado en la domo de la
Eternulo. 3 Kaj li diris al la Levidoj, la instruantoj de la
tuta Izrael, konsekritaj al la Eternulo: Metu la sanktan
keston en la domon, kiun konstruis Salomono, filo de
David, reĝo de Izrael; vi ne bezonas porti ĝin sur la
ŝultroj; servu nun al la Eternulo, via Dio, kaj al Lia
popolo Izrael. 4 Aranĝu vin laŭ viaj patrodomoj, laŭ
viaj grupoj, laŭ la preskribo de David, reĝo de Izrael,
kaj laŭ la preskribo de lia filo Salomono. 5 Kaj staru
en la sanktejo laŭ klasoj, laŭ la patrodomoj de viaj
fratoj, filoj de la popolo, kaj laŭ la patrodomaj grupoj
de la Levidoj. 6 Kaj buĉu la Paskon, kaj sanktigu vin,
kaj pretigu por viaj fratoj, agante laŭ la vorto de la
Eternulo per Moseo. 7 Kaj Joŝija donis donace al la
filoj de la popolo ŝafojn, ŝafidojn, kapridojn, ĉion por
la Paskoj, por ĉiuj, kiuj tie troviĝis, en la nombro de
tridek mil, kaj tri mil bovojn. Tio estis el la havaĵo
de la reĝo. 8 Kaj liaj eminentuloj donis memvolan
donacon al la popolo, al la pastroj, kaj al la Levidoj.
Ĥilkija, Zeĥarja, kaj Jeĥiel, la estroj en la domo de Dio,
donis al la pastroj por la Paskoj du mil sescent ŝafidojn
kaj tricent bovojn; 9 Konanja, Ŝemaja, kaj Netanel, liaj
fratoj, kaj Ĥaŝabja, Jeiel, kaj Jozabad, la estroj de la
Levidoj, donacis al la Levidoj por la Paskoj kvin mil
ŝafidojn kaj kvincent bovojn. 10 Tiamaniere la servado
estis aranĝita. Kaj la pastroj stariĝis sur siaj postenoj
kaj la Levidoj laŭ iliaj grupoj, laŭ la ordono de la reĝo.
11 Kaj ili buĉis la Paskon. Kaj la pastroj aspergis el siaj
manoj, kaj la Levidoj senhaŭtigis. 12 Kaj ili apartigis la
bruloferojn, por doni ilin laŭklase, laŭ la patrodomoj,
al la filoj de la popolo, por alportado al la Eternulo,
kiel estas skribite en la libro de Moseo. Tiel same ili
agis kun la bovoj. 13 Kaj ili kuiris la Paskon sur fajro,
laŭ la preskribo; kaj la sanktajn oferojn ili kuiris en
kaldronoj, en potoj, kaj en kaseroloj, kaj faris tion
rapide por la tuta popolo. 14 Kaj poste ili pretigis por
si kaj por la pastroj; ĉar la pastroj, la Aaronidoj, estis
okupitaj je la alportado de la bruloferoj kaj seboj ĝis la
nokto; tial la Levidoj pretigis por si kaj por la pastroj,
la Aaronidoj. 15 La kantistoj, idoj de Asaf, estis sur siaj
postenoj laŭ la preskribo de David, Asaf, Heman, kaj
Jedutun, la viziisto de la reĝo, kaj la pordegistoj estis
ĉe ĉiu pordego; ili ne bezonis forlasi sian servadon, ĉar
iliaj fratoj, la Levidoj, preparis por ili. 16 Tiamaniere
estis aranĝita en tiu tago la servado al la Eternulo,
por farado de la Pasko kaj alportado de bruloferoj
sur la altaro de la Eternulo, laŭ la ordono de la reĝo
Joŝija. 17 Kaj la Izraelidoj, kiuj tie troviĝis, faris la
Paskon en tiu tempo kaj la feston de macoj dum sep
tagoj. 18 Tia Pasko ne estis farita en Izrael de post
la tempo de la profeto Samuel; kaj el ĉiuj reĝoj de
Izrael neniu faris tian Paskon, kian faris Joŝija, kaj
la pastroj, kaj la Levidoj, kaj ĉiuj Judoj kaj Izraelidoj,
kiuj tie troviĝis, kaj la loĝantoj de Jerusalem. 19 En
la dek-oka jaro de la reĝado de Joŝija estis farita tiu
Pasko. 20 Post ĉio ĉi tio, kion Joŝija aranĝis en la
domo, Neĥo, reĝo de Egiptujo, eliris milite kontraŭ
Karkemiŝon ĉe Eŭfrato. Kaj eliris kontraŭ lin Joŝija. 21
Kaj tiu sendis al li senditojn, por diri: Kio estas inter

mi kaj vi, ho reĝo de Judujo? ne kontraŭ vin mi nun
iras, sed tien, kie mi havas militon. Kaj Dio diris, ke
mi rapidu; ne kontraŭstaru al Dio, kiu estas kun mi,
por ke Li vin ne pereigu. 22 Sed Joŝija ne forturnis
sin de li, sed alivestis sin por batali kontraŭ li; li ne
obeis la vortojn de Neĥo el la buŝo de Dio, sed li iris
en la valon Megido, por batali. 23 La pafistoj pafis
sur la reĝon Joŝija; kaj la reĝo diris al siaj servantoj:
Forkonduku min, ĉar mi estas grave vundita. 24 Liaj
servantoj deprenis lin de la ĉaro, kaj sidigis lin sur alia
veturilo, kiun li havis, kaj venigis lin en Jerusalemon.
Kaj li mortis, kaj oni enterigis lin en la tomboj de liaj
patroj. Kaj la tuta Judujo kaj Jerusalem funebris pri
Joŝija. 25 Ankaŭ Jeremia plorkantis pri Joŝija; kaj ĉiuj
kantistoj kaj kantistinoj parolis en siaj plorkantoj pri
Joŝija ĝis la nuna tago kaj faris ilin tradiciaj ĉe Izrael;
ili estas enskribitaj en la libro de la plorkantoj. 26 La
cetera historio de Joŝija kaj liaj virtoj, konformaj al la
preskriboj de la instruo de la Eternulo, 27 kaj liaj agoj,
la unuaj kaj la lastaj, estas priskribitaj en la libro de la
reĝoj de Izrael kaj Judujo.

**36** La popolo de la lando prenis Jehoaĥazon, filon
de Joŝija, kaj faris lin reĝo anstataŭ lia patro
en Jerusalem. 2 La aĝon de dudek tri jaroj havis
Jehoaĥaz, kiam li fariĝis reĝo, kaj tri monatojn li reĝis
en Jerusalem. 3 La reĝo de Egiptujo detronigis lin en
Jerusalem, kaj punis la landon per kontribucio de cent
kikaroj da arĝento kaj unu kikaro da oro. 4 Kaj la reĝo
de Egiptujo ekreĝigis super Judujo kaj Jerusalem lian
fraton Eljakim, kaj ŝanĝis lian nomon je Jehojakim;
kaj lian fraton Jehoaĥaz Neĥo prenis kaj forkondukis
en Egiptujon. 5 La aĝon de dudek kvin jaroj havis
Jehojakim, kiam li fariĝis reĝo, kaj dek unu jarojn li
reĝis en Jerusalem. Kaj li agadis malbone antaŭ la
Eternulo, lia Dio. 6 Kontraŭ lin iris Nebukadnecar,
reĝo de Babel, kaj ligis lin per ĉenoj, por forkonduki
lin en Babelon. 7 Kaj parton el la vazoj de la domo
de la Eternulo Nebukadnecar transportis en Babelon
kaj metis ilin en sian templon en Babel. 8 La cetera
historio de Jehojakim, kaj liaj abomenindaĵoj, kiujn li
faris kaj kiujn oni trovis pri li, estas priskribitaj en
la libro de la reĝoj de Izrael kaj Judujo. Kaj anstataŭ
li ekreĝis lia filo Jehojaĥin. 9 La aĝon de ok jaroj
havis Jehojaĥin, kiam li fariĝis reĝo, kaj tri monatojn
kaj dek tagojn li reĝis en Jerusalem. Kaj li agadis
malbone antaŭ la Eternulo. 10 Kiam la jaro finiĝis, la
reĝo Nebukadnecar sendis, kaj venigis lin en Babelon,
kune kun multekostaj vazoj el la domo de la Eternulo,
kaj li faris lian fraton Cidkija reĝo super Judujo kaj
Jerusalem. 11 La aĝon de dudek unu jaroj havis Cidkija,
kiam li fariĝis reĝo, kaj dek unu jarojn li reĝis en
Jerusalem. 12 Li agadis malbone antaŭ la Eternulo, lia
Dio. Li ne humiliĝis antaŭ Jeremia, kiu profetis laŭ la
vortoj de la Eternulo. 13 Li defalis ankaŭ de la reĝo
Nebukadnecar, kiu ĵurigis lin per Dio; li malmoligis
sian nukon kaj obstinigis sian koron, ne konvertante
sin al la Eternulo, Dio de Izrael. 14 Ankaŭ ĉiuj estroj
de la pastroj kaj de la popolo tre multe pekadis, simile
al ĉiuj abomenindaĵoj de la nacioj, kaj ili malpurigis la
domon de la Eternulo, kiun Li sanktigis en Jerusalem.
15 La Eternulo, Dio de iliaj patroj, avertadis ilin per
Siaj senditoj, konstante avertadis, ĉar Li domaĝis
Sian popolon kaj Sian loĝejon. 16 Sed ili mokis la
senditojn de Dio, malŝatis Liajn vortojn, kaj ridis
pri Liaj profetoj, ĝis la kolero de la Eternulo leviĝis
kontraŭ Lian popolon tiel, ke saniĝo fariĝis ne ebla. 17
Kaj Li venigis sur ilin la reĝon de la Ĥaldeoj, kaj ĉi
tiu mortigis iliajn junulojn per glavo en la domo de
ilia sanktejo; li ne kompatis junulon nek junulinon,
nek maljunulon nek grizulon: ĉio estis transdonita en
lian manon. 18 Kaj ĉiujn objektojn el la domo de Dio,
la grandajn kaj la malgrandajn, kaj la trezorojn de
la domo de la Eternulo, kaj la trezorojn de la reĝo
kaj de liaj altranguloj, ĉion li transportis en Babelon.
19 Kaj ili forbruligis la domon de Dio kaj detruis
la muregojn de Jerusalem, kaj ĉiujn ĝiajn palacojn
ili forbruligis per fajro, kaj ĉiujn ĝiajn plej karajn
objektojn ili neniigis. 20 Kaj tiujn, kiuj restis de la
glavo, li forkondukis en Babelon, kaj ili fariĝis sklavoj
por li kaj por liaj filoj, ĝis venis la regado de la Persoj;
21 por ke plenumiĝu la vorto de la Eternulo, dirita per
Jeremia: Ĝis la lando estos elfestinta siajn sabatojn.
Ĉar dum la tuta tempo de sia dezerteco ĝi havis
sabaton, ĝis finiĝis sepdek jaroj. 22 En la unua jaro de
Ciro, reĝo de Persujo, por ke plenumiĝu la vorto de la
Eternulo, dirita per Jeremia, la Eternulo ekscitis la
spiriton de Ciro, reĝo de Persujo, kaj ĉi tiu ordonis
proklami en sia tuta regno voĉe kaj skribe jenon: 23
Tiele diras Ciro, reĝo de Persujo: Ĉiujn regnojn de
la tero donis al mi la Eternulo, Dio de la ĉielo, kaj Li
komisiis al mi konstrui al Li domon en Jerusalem, kiu
estas en Judujo. Kiu inter vi estas el Lia tuta popolo,
kun tiu estu la Eternulo, lia Dio, kaj li tien iru.

# Ezra

**1** En la unua jaro de Ciro, reĝo de Persujo, por
ke plenumiĝu la vorto de la Eternulo, dirita per
Jeremia, la Eternulo ekscitis la spiriton de Ciro, reĝo
de Persujo, kaj ĉi tiu ordonis proklami en sia tuta
regno voĉe kaj skribe jenon: **2** Tiele diras Ciro, reĝo
de Persujo: Ĉiujn regnojn de la tero donis al mi la
Eternulo, Dio de la ĉielo, kaj Li komisiis al mi konstrui
al Li domon en Jerusalem, kiu estas en Judujo. **3** Kiu
inter vi estas el Lia tuta popolo, kun tiu estu lia Dio;
kaj li iru en Jerusalemon, kiu estas en Judujo, kaj
konstruu la domon de la Eternulo, Dio de Izrael, de
tiu Dio, kiu estas en Jerusalem. **4** Kaj al ĉiu, kiu restis,
en kiu ajn loko li loĝas, la loĝantoj de lia loko helpu al
li per arĝento, per oro, per alia havo, kaj per brutoj,
kun memvola donaco por la domo de Dio, kiu estas en
Jerusalem. **5** Kaj leviĝis la ĉefoj de la patrodomoj de
Jehuda kaj de Benjamen, kaj la pastroj kaj la Levidoj,
ĉiu, en kiu Dio vekis lian spiriton, por iri konstrui la
domon de la Eternulo en Jerusalem. **6** Kaj ĉiuj iliaj
ĉirkaŭantoj helpis al ili per arĝentaj objektoj, per oro,
per alia havo, per brutoj, kaj per multekostaĵoj, krom
ĉiuj memvolaj donacoj. **7** Kaj la reĝo Ciro elportigis la
vazojn de la domo de la Eternulo, kiujn Nebukadnecar
estis elportinta el Jerusalem kaj metinta en la domon
de liaj dioj; **8** Ciro, reĝo de Persujo, elportigis ilin per
la trezoristo Mitredat, kiu laŭkalkule transdonis ilin
al Ŝeŝbacar, princo de la Judoj. **9** Kaj jen estas ilia
nombro: da oraj pelvoj tridek, da arĝentaj pelvoj mil,
da tranĉiloj dudek naŭ, **10** da oraj kalikoj tridek, da
arĝentaj duoblaj kalikoj kvarcent dek, da aliaj vazoj
mil. **11** La nombro de ĉiuj vazoj oraj kaj arĝentaj estis
kvin mil kvarcent. Ĉion ĉi tion kunportis Ŝeŝbacar ĉe
la foriro de la forkaptitoj el Babel en Jerusalemon.

**2** Jen estas la loĝantoj de la lando, kiuj iris el
la forkaptitoj, kiujn forkondukis en Babelon
Nebukadnecar, reĝo de Babel, kaj kiuj revenis en
Jerusalemon kaj en Judujon, ĉiu en sian urbon, **2** kiuj
venis kun Zerubabel, Jeŝua, Neĥemja, Seraja, Reelaja,
Mordeĥaj, Bilŝan, Mispar, Bigvaj, Reĥum, Baana. La
nombro de la viroj de la popolo Izraela estis: **3** de
la idoj de Paroŝ, du mil cent sepdek du, **4** de la idoj
de Ŝefatja, tricent sepdek du, **5** de la idoj de Araĥ,
sepcent sepdek kvin, **6** de la idoj de Paĥat-Moab, el
la idoj de Jeŝua kaj Joab, du mil okcent dek du, **7**
de la idoj de Elam, mil ducent kvindek kvar, **8** de la
idoj de Zatu, naŭcent kvardek kvin, **9** de la idoj de
Zakaj, sepcent sesdek, **10** de la idoj de Bani, sescent
kvardek du, **11** de la idoj de Bebaj, sescent dudek tri,
**12** de la idoj de Azgad, mil ducent dudek du, **13** de la
idoj de Adonikam, sescent sesdek ses, **14** de la idoj
de Bigvaj, du mil kvindek ses, **15** de la idoj de Adin,
kvarcent kvindek kvar, **16** de la idoj de Ater, el la
domo de Ĥizkija, naŭdek ok, **17** de la idoj de Becaj,
tricent dudek tri, **18** de la idoj de Jora, cent dek du, **19**
de la idoj de Ĥaŝum, ducent dudek tri, **20** de la idoj de
Gibar, naŭdek kvin, **21** de la idoj de Bet-Leĥem, cent
dudek tri, **22** de la loĝantoj de Netofa, kvindek ses, **23**
de la loĝantoj de Anatot, cent dudek ok, **24** de la idoj
de Azmavet, kvardek du, **25** de la idoj de Kirjat-Arim,
Kefira, kaj Beerot, sepcent kvardek tri, **26** de la idoj de
Rama kaj Geba, sescent dudek unu, **27** de la loĝantoj
de Miĥmas, cent dudek du, **28** de la loĝantoj de Bet-El
kaj Aj, ducent dudek tri, **29** de la idoj de Nebo, kvindek
du, **30** de la idoj de Magbiŝ, cent kvindek ses, **31** de la
idoj de la alia Elam, mil ducent kvindek kvar, **32** de
la idoj de Ĥarim, tricent dudek, **33** de la idoj de Lod,
Ĥadid, kaj Ono, sepcent dudek kvin, **34** de la idoj de
Jeriĥo, tricent kvardek kvin, **35** de la idoj de Senaa, tri
mil sescent tridek. **36** De la pastroj: de la idoj de Jedaja,
el la domo de Jeŝua, naŭcent sepdek tri, **37** de la idoj
de Imer, mil kvindek du, **38** de la idoj de Paŝĥur, mil
ducent kvardek sep, **39** de la idoj de Ĥarim, mil dek
sep. **40** De la Levidoj: de la idoj de Jeŝua kaj Kadmiel,
el la filoj de Hodavja, sepdek kvar. **41** De la kantistoj:
de la idoj de Asaf, cent dudek ok. **42** De la idoj de la
pordegistoj: la idoj de Ŝalum, la idoj de Ater, la idoj de
Talmon, la idoj de Akub, la idoj de Ĥatita, la idoj de
Ŝobaj, ĉiuj kune cent tridek naŭ. **43** De la Netinoj: la
idoj de Ciĥa, la idoj de Ĥasufa, la idoj de Tabaot, **44** la
idoj de Keros, la idoj de Siaha, la idoj de Padon, **45** la
idoj de Lebana, la idoj de Ĥagaba, la idoj de Akub, **46**
la idoj de Ĥagab, la idoj de Ŝalmaj, la idoj de Ĥanan, **47**
la idoj de Gidel, la idoj de Gaĥar, la idoj de Reaja, **48** la
idoj de Recin, la idoj de Nekoda, la idoj de Gazam, **49**
la idoj de Uza, la idoj de Paseaĥ, la idoj de Besaj, **50** la
idoj de Asna, la idoj de Meunim, la idoj de Nefusim, **51**
la idoj de Bakbuk, la idoj de Ĥakufa, la idoj de Ĥarĥur,
**52** la idoj de Baclut, la idoj de Meĥida, la idoj de Ĥarŝa,
**53** la idoj de Barkos, la idoj de Sisra, la idoj de Tamaĥ,
**54** la idoj de Neciaĥ, la idoj de Ĥatifa. **55** La idoj de
la servantoj de Salomono: la idoj de Sotaj, la idoj de

Soferet, la idoj de Peruda, 56 la idoj de Jaala, la idoj
de Darkon, la idoj de Gidel, 57 la idoj de Ŝefatja, la
idoj de Ĥatil, la idoj de Poĥeret-Cebaim, la idoj de
Ami. 58 La nombro de ĉiuj Netinoj kaj de la idoj de la
servantoj de Salomono estis tricent naŭdek du. 59 Kaj
jen estas la elirintoj el Tel-Melaĥ, Tel-Ĥarŝa, Kerub,
Adan, kaj Imer, kiuj ne povis montri sian patrodomon
kaj devenon, ĉu ili devenas de Izrael: 60 la idoj de
Delaja, la idoj de Tobija, la idoj de Nekoda, sescent
kvindek du. 61 Kaj el la pastridoj: la idoj de Ĥabaja,
la idoj de Hakoc, la idoj de Barzilaj, kiu prenis al si
edzinon el la filinoj de Barzilaj, la Gileadano, kaj estis
nomata per ilia nomo. 62 Ili serĉis siajn dokumentojn
genealogiajn, sed ĉi tiuj ne troviĝis; tial ili estis eligitaj
el la listo de la pastroj. 63 Kaj la regionestro diris
al ili, ke ili ne manĝu el la plejsanktaĵo, ĝis aperos
pastro kun la signoj de lumo kaj de justo. 64 La tuta
komunumo kune konsistis el kvardek du mil tricent
sesdek homoj, 65 krom iliaj sklavoj kaj sklavinoj, kies
nombro estis sep mil tricent tridek sep, kaj al tio estis
ducent kantistoj kaj kantistinoj. 66 Da ĉevaloj ili havis
sepcent tridek ses; da muloj ili havis ducent kvardek
kvin; 67 da kameloj ili havis kvarcent tridek kvin; da
azenoj ses mil sepcent dudek. 68 Kelkaj el la ĉefoj de
patrodomoj, veninte al la domo de la Eternulo en
Jerusalem, faris memvolan oferon por la domo de Dio,
por restarigi ĝin sur ĝia fundamento. 69 Laŭ sia povo
ili donis en la trezorejon de la laboroj: da oro sesdek
unu mil darkemonojn, da arĝento kvin mil min'ojn,
kaj da pastraj vestoj cent. 70 Kaj ekloĝis la pastroj
kaj la Levidoj kaj la popolanoj kaj la kantistoj kaj la
pordegistoj kaj la Netinoj en siaj urboj, kaj la tuta
Izrael en siaj urboj.

3 Kiam venis la sepa monato kaj la Izraelidoj estis
jam en la urboj, kolektiĝis la tuta popolo, kiel
unu homo, en Jerusalem. 2 Kaj leviĝis Jeŝua, filo de
Jocadak, kaj liaj fratoj, la pastroj, kaj Zerubabel, filo
de Ŝealtiel, kaj liaj fratoj, kaj ili konstruis la altaron de
Dio de Izrael, por alportadi sur ĝi bruloferojn, kiel
estas skribite en la instruo de Moseo, la homo de Dio.
3 Kaj ili aranĝis la altaron sur ĝia loko, ĉar ili timis la
popolojn de la landoj; kaj ili komencis alportadi sur ĝi
bruloferojn al la Eternulo, bruloferojn matenajn kaj
vesperajn. 4 Kaj ili solenis la feston de laŭboj, kiel
estas skribite, kaj faris la ĉiutagajn bruloferojn laŭ ilia
nombro, konforme al tio, kio estas preskribita por ĉiu
tago; 5 kaj post tio la ĉiutagajn bruloferojn, kaj por la
monatkomencoj kaj por ĉiuj sanktigitaj festoj de la
Eternulo, kaj por ĉiu, kiu alportis memvolan oferon al
la Eternulo. 6 De la unua tago de la sepa monato ili
komencis alportadi bruloferojn al la Eternulo. Sed la
fundamento por la templo de la Eternulo ankoraŭ ne
estis starigita. 7 Kaj ili donis monon al la ŝtonhakistoj
kaj ĉarpentistoj, kaj manĝaĵon, trinkaĵon, kaj oleon
al Cidonanoj kaj Tiranoj, por ke ili venigu cedrojn
de Lebanon per la maro ĝis Jafo, konforme al la
permeso, kiun donis al ili Ciro, reĝo de Persujo. 8
En la dua jaro post ilia alveno al la domo de Dio
en Jerusalem, en la dua monato, Zerubabel, filo de
Ŝealtiel, kaj Jeŝua, filo de Jocadak, kaj iliaj ceteraj
fratoj, la pastroj, kaj la Levidoj, kaj ĉiuj, kiuj venis
el la kaptiteco en Jerusalemon, faris la komencon,
kaj starigis la Levidojn, havantajn la aĝon de dudek
jaroj kaj pli, por inspekti la laborojn en la domo de
la Eternulo. 9 Kaj Jeŝua kun siaj filoj kaj fratoj, kaj
Kadmiel kun siaj filoj, la idoj de Jehuda, stariĝis kiel
unu homo, por inspekti la faradon de la laboroj en
la domo de Dio, ankaŭ la idoj de Ĥenadad kun siaj
filoj kaj fratoj, la Levidoj. 10 Kiam la konstruistoj
starigis fundamenton por la templo de la Eternulo,
tiam stariĝis la pastroj en siaj vestoj kun trumpetoj,
kaj la Levidoj, idoj de Asaf, kun cimbaloj, por glori
la Eternulon per la kantoj de David, reĝo de Izrael.
11 Kaj ili ekkantis gloron kaj laŭdon al la Eternulo,
ke Li estas bona, ke eterna estas Lia favorkoreco al
Izrael; kaj la tuta popolo ĝojkriis laŭte, glorante la
Eternulon pro la fondo de la domo de la Eternulo.
12 Kaj multaj el la pastroj kaj el la Levidoj kaj el la
ĉefoj de patrodomoj, maljunuloj, kiuj vidis la unuan
templon, nun, ĉe la fondado de ĉi tiu templo antaŭ
iliaj okuloj, laŭte ploris; sed multaj laŭte ĝojkriis.
13 Kaj la popolo ne povis distingi inter la sonoj de
la ĝojkriado kaj la sonoj de la popola plorado; ĉar
la popolo kriis tre laŭte, kaj tiu kriado estis aŭdata
malproksime.

4 Kiam la malamikoj de Jehuda kaj Benjamen aŭdis,
ke la revenintoj el la kaptiteco konstruas templon al
la Eternulo, Dio de Izrael, 2 tiam ili venis al Zerubabel
kaj al la ĉefoj de la patrodomoj, kaj diris al ili: Ni ankaŭ
deziras konstrui kun vi, ĉar simile al vi ni ankaŭ serĉas
vian Dion, kaj al Li ni alportas oferojn de post la tempo
de Esar-Ĥadon, reĝo de Asirio, kiu venigis nin ĉi tien. 3

Sed Zerubabel kaj Jeŝua kaj la aliaj ĉefoj de patrodomoj
de Izrael diris al ili: Ne estas bone, ke vi kune kun ni
konstruu domon por nia Dio; ni solaj konstruos por
la Eternulo, Dio de Izrael, kiel ordonis al ni la reĝo
Ciro, reĝo de Persujo. 4 Tiam la popolo de la lando
komencis malfortigadi la manojn de la Juda popolo kaj
malhelpadi al ĝi en la konstruado. 5 Kaj ili dungadis
kontraŭ ili konsilistojn, por detrui ilian entreprenon,
dum la tuta tempo de Ciro, reĝo de Persujo, ĝis la
reĝado de Dario, reĝo de Persujo. 6 Kaj en la tempo de
la reĝado de Aĥaŝveroŝ, en la komenco de lia reĝado,
ili skribis akuzon kontraŭ la loĝantoj de Judujo kaj
de Jerusalem. 7 En la tempo de Artaĥŝaŝt skribis
Biŝlam, Mitredat, Tabeel, kaj la aliaj iliaj kunuloj al
Artaĥŝaŝt, reĝo de Persujo: la letero estis skribita Sirie
kaj klarigita Sirie. 8 Reĥum, konsilisto, kaj Ŝimŝaj,
skribisto, skribis unu leteron kontraŭ Jerusalem al
Artaĥŝaŝt, la reĝo, en la sekvanta maniero: 9 Ni,
Reĥum, konsilisto, kaj Ŝimŝaj, skribisto, kaj iliaj
aliaj kunuloj, Dinaanoj, Afarsatĥanoj, Tarpelanoj,
Afarsanoj, Arkevanoj, Babelanoj, Ŝuŝananoj, Dehaanoj,
Elamanoj, 10 kaj la aliaj popoloj, kiujn transloĝigis
Asnapar, la granda kaj glora, kaj enloĝigis en Samario
kaj en la aliaj urboj transriveraj, kaj tiel plu. 11 Jen
estas la teksto de la letero, kiun ili sendis al li: Al la
reĝo Artaĥŝaŝt viaj sklavoj, la transriveranoj, kaj tiel
plu. 12 Estu sciate al la reĝo, ke la Judoj, kiuj foriris
de vi kaj venis al ni en Jerusalemon, rekonstruas
nun tiun ribeleman kaj malbonan urbon kaj faras
muregojn kaj starigas jam la fundamentojn. 13 Nun
estu sciate al la reĝo, ke se tiu urbo estos konstruita
kaj la muregoj estos finitaj, tiam ili ne donos tributon
nek impostojn nek jarpagon, kaj la reĝa kaso havos
malprofiton. 14 Ĉar ni manĝas salon el la reĝa palaco,
kaj ni ne volas vidi ion, kio malhonoras la reĝon, tial
ni sendas kaj sciigas al la reĝo, 15 ke oni serĉu en la
kronikoj de viaj patroj, kaj vi trovos en la kronikoj
kaj konvinkiĝos, ke tiu urbo estas urbo ribelema kaj
malutila por la reĝoj kaj landoj, kaj ke ribeloj estis
farataj en ĝi de la plej malproksimaj tempoj, kio estas
la kaŭzo, pro kiu tiu urbo estis detruita. 16 Ni sciigas
al la reĝo, ke se tiu urbo estos rekonstruita kaj ĝiaj
muregoj estos finitaj, tiam vi poste havos nenian
parton en la regiono transrivera. 17 La reĝo sendis
respondon: Al Reĥum, konsilisto, Ŝimŝaj, skribisto, kaj
al la aliaj iliaj kunuloj, kiuj loĝas en Samario kaj en la
aliaj transriveraj lokoj, pacon kaj saluton. 18 La letero,
kiun vi sendis al ni, estas klare legita antaŭ mi; 19
kaj mi donis ordonon, ke oni serĉu; kaj oni trovis, ke
tiu urbo de malproksima tempo ribeladis kontraŭ la
reĝoj, kaj tumultoj kaj defaloj estis farataj en ĝi; 20
ke potencaj reĝoj estis en Jerusalem kaj posedis la
tutan transriveran regionon, kaj tributo, impostoj,
kaj jarpagoj estis donataj al ili. 21 Tial agu laŭ ĉi tiu
ordono: malhelpu tiujn homojn en ilia laborado, ke la
urbo ne estu rekonstruata, ĝis estos donita ordono de
mi. 22 Kaj estu singardaj, ke vi ne estu malatentaj en
tio, por ke ne naskiĝu granda malprofito por la reĝo.
23 Kiam ĉi tiu letero de la reĝo Artaĥŝaŝt estis tralegita
antaŭ Reĥum, la skribisto Ŝimŝaj, kaj iliaj kunuloj, ili
tuj iris en Jerusalemon al la Judoj kaj haltigis ilian
laboradon per forta mano. 24 Tiam ĉesiĝis la laborado
ĉe la domo de Dio en Jerusalem; kaj tiu stato daŭris
ĝis la dua jaro de reĝado de Dario, reĝo de Persujo.

**5** Kaj la profetoj, Ĥagaj, la profeto, kaj Zeĥarja, filo
de Ido, profetis pri la Judoj, kiuj estis en Judujo kaj
Jerusalem, en la nomo de Dio de Izrael. 2 Tiam leviĝis
Zerubabel, filo de Ŝealtiel, kaj Jeŝua, filo de Jocadak,
kaj komencis konstrui la domon de Dio en Jerusalem,
kaj kun ili estis la profetoj de Dio, kiuj fortigadis
ilin. 3 En tiu tempo venis al ili Tatnaj, la estro de la
transrivera regiono, kaj Ŝetar-Boznaj, kaj iliaj kunuloj,
kaj tiele diris al ili: Kiu permesis al vi konstrui ĉi tiun
domon kaj starigi ĉi tiujn murojn? 4 Tiam ni diris al
ili, kiaj estis la nomoj de tiuj homoj, kiuj konstruis
tiun konstruaĵon. 5 Sed la okulo de ilia Dio estis super
la plejaĝuloj de la Judoj, kaj ili ne estis malhelpataj, ĝis
la afero estis raportita al Dario kaj ĝis revenis decido
pri tio. 6 Jen estas la enhavo de la letero, kiun sendis
Tatnaj, la estro de la transrivera regiono, kaj Ŝetar-
Boznaj, kun siaj kunuloj la Afarseĥanoj, kiuj estis en
la transrivera regiono, al la reĝo Dario; 7 la raporto,
kiun ili sendis al li, havis la sekvantan tekston: Al la
reĝo Dario plenan pacon. 8 Estu sciate al la reĝo, ke
ni iris en la Judan landon, al la domo de la granda
Dio; ĝi estas konstruata el grandaj ŝtonoj, kaj trabojn
oni enmetas en la murojn, kaj la laboro estas farata
vigle kaj sukcesas en iliaj manoj. 9 Tiam ni demandis
tiujn plenaĝulojn, kaj diris al ili: Kiu donis al vi la
permeson konstrui ĉi tiun domon kaj starigi ĉi tiujn
murojn? 10 Kaj krom tio ni demandis pri iliaj nomoj,
por raporti al vi, kaj skribi la nomojn de tiuj homoj,
kiuj estas iliaj ĉefoj. 11 Per la sekvantaj vortoj ili

respondis al ni kaj diris: Ni estas servantoj de Dio de
la ĉielo kaj de la tero, kaj ni konstruas la domon, kiu
estis konstruita antaŭ multe da jaroj, kaj granda reĝo
de Izrael konstruis ĝin kaj finis ĝin. 12 Sed kiam niaj
patroj kolerigis Dion de la ĉielo, Li transdonis ilin en
la manon de Nebukadnecar, reĝo de Babel, la Ĥaldeo;
kaj tiun domon li detruis, kaj la popolon li transloĝigis
en Babelon. 13 Sed en la unua jaro de Ciro, reĝo de
Babel, la reĝo Ciro donis permeson rekonstrui ĉi tiun
domon de Dio. 14 Eĉ la vazojn de la domo de Dio, la
orajn kaj arĝentajn, kiujn Nebukadnecar elportis el la
templo de Jerusalem kaj forportis en la templon de
Babel, ilin la reĝo Ciro elportis el la templo de Babel,
kaj oni transdonis ilin al Ŝeŝbacar, kiun li starigis kiel
regionestron; 15 kaj li diris al li: Prenu ĉi tiujn vazojn,
iru, kaj forportu ilin en la templon de Jerusalem, kaj
la domo de Dio estu konstruata sur sia loko. 16 Tiam
venis tiu Ŝeŝbacar kaj metis la fundamenton por la
domo de Dio en Jerusalem; kaj de tiu tempo ĝis nun ĝi
estas konstruata, kaj ĝi ankoraŭ ne estas finita. 17
Tial, se plaĉas al la reĝo, oni serĉu en la domo de la
reĝaj trezoroj tie en Babel, ĉu efektive la reĝo Ciro
donis permeson konstrui ĉi tiun domon de Dio en
Jerusalem; kaj la volon de la reĝo pri tio oni sendu al
ni.

**6** Tiam la reĝo Dario ordonis, ke oni serĉu en la domo
de dokumentoj, kie la trezoroj estis deponitaj, en
Babel. 2 Kaj oni trovis en Aĥmeta, la reĝa kastelo en
la Meda lando, unu skribrulaĵon, en kiu estis skribita
la sekvanta pormemoraĵo: 3 En la unua jaro de la reĝo
Ciro, la reĝo Ciro donis ordonon: Pri la domo de Dio
en Jerusalem, estu konstruata domo, loko, kie oni
alportas oferojn, kaj fortikaj fundamentoj por ĝi estu
starigitaj; la alto de la domo estu sesdek ulnoj, ĝia
larĝo estu sesdek ulnoj. 4 Da vicoj el grandaj ŝtonoj
estu tri, kaj unu vico el ligno; la elspezoj estu donataj
el la reĝa domo. 5 Ankaŭ la vazojn de la domo de
Dio, orajn kaj arĝentajn, kiujn Nebukadnecar elportis
el la templo de Jerusalem kaj forportis en Babelon,
oni redonu, kaj ili iru en la templon de Jerusalem
sur sian lokon kaj estu lokitaj en la domo de Dio. 6
Tial Tatnaj, la estro de la transrivera regiono, Ŝetar-
Boznaj, kaj iliaj kunuloj, la Afarseĥanoj, kiuj estas en
la transrivera regiono, foriĝu de tie; 7 permesu al ili
labori ĉe la domo de Dio; la regionestro de Judujo kaj
la plejaĝuloj de la Judoj konstruu tiun domon de Dio
sur ĝia loko. 8 Kaj de mi estas donata ordono pri tio,
kio devas esti farata al la plejaĝuloj de la Judoj por la
konstruado de tiu domo: el la apartenaĵo de la reĝo, el
la transriveraj impostoj oni tuj donu la elspezojn al
tiuj homoj, por ke la laborado ne haltu. 9 Kaj tiom
estos necese da bovoj, ŝafoj, aŭ ŝafidoj por bruloferoj
por Dio de la ĉielo, da tritiko, salo, vino, oleo, kiel
diros la pastroj en Jerusalem, oni donadu al ili ĉiutage
sen halto, 10 por ke ili alportadu agrablodoran oferon
al la Dio de la ĉielo, kaj por ke ili preĝu pri la vivo
de la reĝo kaj de liaj infanoj. 11 De mi estas donata
la ordono, ke se iu homo ŝanĝos ĉi tiun decidon,
oni elprenu trabon el lia domo, kaj li estu levita kaj
alnajlita al ĝi, kaj lia domo pro tio estu ruinigita. 12
Kaj Dio, kiu loĝigis tie Sian nomon, faligu ĉiun reĝon
kaj popolon, kiu etendus sian manon, por ŝanĝi ĉi
tion, por fari ion malutilan al tiu domo de Dio en
Jerusalem. Mi, Dario, donis la ordonon; ĝi estu tuj
plenumita. 13 Tiam Tatnaj, la estro de la transrivera
regiono, Ŝetar-Boznaj, kaj iliaj kunuloj komencis tuj
agadi konforme al tio, kion ordonis la reĝo Dario. 14
Kaj la plejaĝuloj de la Judoj konstruis kun sukceso,
konforme al la profetado de Ĥagaj, la profeto, kaj
de Zeĥarja, filo de Ido. Kaj ili konstruis kaj finis laŭ
la volo de Dio de Izrael, kaj laŭ la volo de Ciro, de
Dario, kaj de Artaĥŝaŝt, reĝoj de Persujo. 15 Kaj oni
finis la domon en la tria tago de la monato Adar,
en la sesa jaro de reĝado de la reĝo Dario. 16 Kaj la
Izraelidoj, la pastroj, la Levidoj, kaj la aliaj revenintoj
el la kaptiteco faris kun ĝojo la sanktigon de tiu domo
de Dio. 17 Kaj oni alportis ĉe la sanktigo de tiu domo
de Dio: cent bovojn, ducent ŝafojn, kvarcent ŝafidojn,
kaj dek du pekoferajn kaprojn pro la tuta Izrael, laŭ
la nombro de la triboj de Izrael. 18 Kaj oni starigis
la pastrojn laŭ iliaj ordoj, kaj la Levidojn laŭ iliaj
vicoj, por la servado al Dio en Jerusalem, kiel estas
preskribite en la libro de Moseo. 19 Kaj la revenintoj
el la kaptiteco faris Paskon en la dek-kvara tago de la
unua monato. 20 Ĉar la pastroj kaj la Levidoj purigis
sin ĉiuj kiel unu homo; kaj ili buĉis Paskajn ŝafidojn
por ĉiuj revenintoj el la kaptiteco, por siaj fratoj, la
pastroj, kaj por si. 21 Kaj manĝis la Izraelidoj, kiuj
revenis el la kaptiteco, kaj ĉiuj, kiuj apartigis sin de la
malpureco de la nacioj de la tero, por turni sin al la
Eternulo, Dio de Izrael. 22 Kaj ili en ĝojo solenis la
feston de macoj dum sep tagoj; ĉar la Eternulo ĝojigis
ilin, kaj turnis al ili la koron de la reĝo de Asirio, por

ke li fortigu iliajn manojn ĉe la laborado koncerne la
domon de Dio, la Dio de Izrael.

**7** Post tiuj okazintaĵoj, dum la reĝado de Artaĥŝast,
reĝo de Persujo, el Babel iris Ezra, filo de Seraja,
filo de Azarja, filo de Ĥilkija, **2** filo de Ŝalum, filo de
Cadok, filo de Aĥitub, **3** filo de Amarja, filo de Azarja,
filo de Merajot, **4** filo de Zeraĥja, filo de Uzi, filo de
Buki, **5** filo de Abiŝua, filo de Pineĥas, filo de Eleazar,
filo de Aaron, la ĉefpastro. **6** Tiu Ezra iris el Babel. Li
estis lerta scienculo koncerne la instruon de Moseo,
kiun donis la Eternulo, Dio de Izrael. Kaj la reĝo donis
al li ĉion laŭ lia deziro, ĉar la mano de la Eternulo, lia
Dio, estis super li. **7** Ankaŭ kelkaj el la Izraelidoj, el la
pastroj, el la Levidoj, el la kantistoj, el la pordegistoj,
kaj el la Netinoj iris en Jerusalemon en la sepa jaro de
la reĝo Artaĥŝast. **8** Kaj li venis en Jerusalemon en la
kvina monato, en la sepa jaro de la reĝo. **9** Ĉar en la
unua tago de la unua monato estis la komenco de la
irado el Babel, kaj en la unua tago de la kvina monato
li venis en Jerusalemon, ĉar la mano de lia Dio favore
estis super li. **10** Ĉar Ezra pretigis sian koron, por studi
la instruon de la Eternulo kaj plenumi ĝin, kaj por
instrui en Izrael leĝojn kaj ordonojn. **11** Kaj jen estas
la teksto de la letero, kiun la reĝo Artaĥŝast donis al
Ezra, la pastro, la scienculo, kiu instruis la vortojn de
la ordonoj de la Eternulo kaj Liajn leĝojn pri Izrael:
**12** Artaĥŝast, reĝo de la reĝoj, al Ezra, pastro, kaj
scienculo pri la leĝoj de Dio de la ĉielo, pacon kaj
saluton. **13** De mi estas ordonite, ke en mia regno ĉiu
el la popolo de Izrael kaj el ĝiaj pastroj kaj Levidoj,
kiu volas iri en Jerusalemon, iru kun vi. **14** Ĉar vi
estas sendata de la reĝo kaj de liaj sep konsilistoj, por
pririgardi Judujon kaj Jerusalemon laŭ la en via mano
troviĝanta leĝo de via Dio, **15** kaj por tien forporti
la arĝenton kaj oron, kiun la reĝo kaj liaj konsilistoj
oferis al Dio de Izrael, kies loĝejo estas en Jerusalem,
**16** kaj la tutan arĝenton kaj oron, kiun vi akiros en
la tuta provinco de Babel, kune kun la memvolaj
donacoj de la popolo kaj de la pastroj, kiuj oferos por
la domo de sia Dio, kiu estas en Jerusalem. **17** Aĉetu
tuj pro tiu mono bovojn, ŝafojn, kaj ŝafidojn, kaj la al
tio apartenantajn farunoferojn kaj verŝoferojn, kaj
alportu ilin sur la altaron de la domo de via Dio en
Jerusalem. **18** Kaj kion vi kaj viaj fratoj trovos bona
fari el la cetera arĝento kaj oro, tion laŭ la volo de via
Dio faru. **19** Kaj la vazojn, kiuj estas donitaj al vi por la
servado en la domo de via Dio, prezentu antaŭ la Dio
de Jerusalem. **20** Kaj ĉion ceteran, kio estas necesa por
la domo de via Dio, kion vi trovos bona doni, donu el
la reĝa trezorejo. **21** Kaj de mi, Artaĥŝast, la reĝo, estas
farata ordono al ĉiuj trezorgardistoj trans la rivero,
ke ĉio, kion postulos de vi Ezra, la pastro, instruisto
de la leĝoj de Dio de la ĉielo, estu tuj plenumata, **22**
ĝis jena kvanto: arĝento ĝis cent kikaroj, tritiko ĝis
cent kor'oj, vino ĝis cent bat'oj, ankaŭ oleo ĝis cent
bat'oj, kaj salo en kvanto senlima. **23** Ĉio, kio estas
ordonita de Dio de la ĉielo, devas esti farata tuj por la
domo de Dio de la ĉielo, por ke Lia kolero ne trafu la
regnon, la reĝon, aŭ liajn infanojn. **24** Kaj ni sciigas
al vi, ke sur neniun el la pastroj, Levidoj, kantistoj,
pordegistoj, Netinoj, aŭ servantoj ĉe tiu domo de Dio
vi devas meti tributon, imposton, aŭ depagojn. **25** Kaj
vi, Ezra, laŭ la saĝo, kiun via Dio donis al vi, starigu
registojn kaj juĝistojn, kiuj juĝadus la tutan popolon,
kiu estas trans la rivero, ĉiujn, kiuj scias la leĝojn de
via Dio; kaj kiu ne scias, tiun instruu. **26** Kaj ĉiu, kiu
ne plenumos la leĝojn de via Dio aŭ la leĝojn de la
reĝo, tuj estu juĝe kondamnata, ĉu al morto, ĉu al
elpelo, ĉu al monpuno, ĉu al meto en malliberejon. **27**
Benata estu la Eternulo, Dio de niaj patroj, kiu metis
en la koron de la reĝo la ideon beligi la domon de la
Eternulo en Jerusalem, **28** kaj sur min turnis favoron
de la reĝo kaj de liaj konsilistoj kaj de ĉiuj potencaj
princoj de la reĝo. Kaj mi ricevis kuraĝon, ĉar la mano
de la Eternulo, mia Dio, estis super mi; kaj mi kolektis
en Izrael ĉefojn, por ke ili iru kun mi.

**8** Jen estas la ĉefoj de patrodomoj kun ilia genealogio,
kiuj iris kun mi el Babel en la tempo de reĝado de
la reĝo Artaĥŝast: **2** el la idoj de Pineĥas: Gerŝom; el la
idoj de Itamar: Daniel; el la idoj de David: Ĥatuŝ; **3** el
la idoj de Ŝeĥanja: el la idoj de Paroŝ: Zeĥarja, kaj kun
li la familianoj, viroj en la nombro de cent kvindek; **4**
el la idoj de Paĥat-Moab: Eljehoenaj, filo de Zeraĥja,
kaj kun li ducent virseksuloj; **5** el la idoj de Ŝeĥanja:
la filo de Jaĥaziel, kaj kun li tricent virseksuloj; **6**
el la idoj de Adin: Ebed, filo de Jonatan, kaj kun li
kvindek virseksuloj; **7** el la idoj de Elam: Jeŝaja, filo
de Atalja, kaj kun li sepdek virseksuloj; **8** el la idoj
de Ŝefatja: Zebadja, filo de Miĥael, kaj kun li okdek
virseksuloj; **9** el la idoj de Joab: Obadja, filo de Jeĥiel,
kaj kun li ducent dek ok virseksuloj; **10** el la idoj
de Ŝelomit: la filo de Josifja, kaj kun li cent sesdek

virseksuloj; 11 el la idoj de Bebaj: Zeĥarja, filo de
Bebaj, kaj kun li dudek ok virseksuloj; 12 el la idoj
de Azgad: Joĥanan, filo de Hakatan, kaj kun li cent
dek virseksuloj; 13 el la idoj de Adonikam la lastaj,
kaj jen estas iliaj nomoj: Elifelet, Jeiel, kaj Ŝemaja,
kaj kun ili sesdek virseksuloj; 14 el la idoj de Bigvaj:
Utaj kaj Zakur, kaj kun ili sepdek virseksuloj. 15 Kaj
mi kolektis ilin ĉe la rivero, kiu enfluas en Ahavan,
kaj ni restis tie tri tagojn; kaj kiam mi ririgardis la
popolon kaj la pastrojn, mi el la idoj de Levi trovis
tie neniun. 16 Tiam mi sendis Eliezeron, Arielon,
Ŝemajan, Elnatanon, Jaribon, Elnatanon, Natanon,
Zeĥarjan, kaj Meŝulamon, la ĉefojn, kaj Jojaribon
kaj Elnatanon, la scienculojn; 17 kaj mi donis al ili
komision al Ido, la ĉefo en la loko Kasifja, kaj mi donis
al ili instrukcion pri tio, kion ili devas diri al Ido, kaj
al liaj fratoj, la Netinoj, en la loko Kasifja, por venigi al
ni servistojn por la domo de nia Dio. 18 Kaj ili venigis
al ni, ĉar super ni estis la favora mano de nia Dio,
homon saĝan el la idoj de Maĥli, filo de Levi, filo de
Izrael, kaj Ŝerebjan kun liaj filoj kaj fratoj, dek ok
homojn, 19 kaj Ĥaŝabjan, kaj kun li Jeŝajan, el la idoj
de Merari, kun liaj fratoj kaj iliaj filoj, dudek; 20 kaj
el la Netinoj, kiujn David kaj la princoj starigis por
servi al la Levidoj, ducent dudek Netinojn; ĉiuj ili
estis registritaj laŭ siaj nomoj. 21 Kaj mi proklamis
tie faston ĉe la rivero Ahava, por ke ni humiligu nin
antaŭ nia Dio, por peti de Li ĝustan vojon por ni, por
niaj infanoj, kaj por nia tuta havo. 22 Ĉar mi hontis
peti de la reĝo militistojn kaj rajdistojn por defendi
nin kontraŭ malamikoj sur la vojo; ĉar ni tiele diris al
la reĝo: La mano de nia Dio estas bonfaranta por ĉiuj,
kiuj sin turnas al Li, kaj Lia potenco kaj Lia kolero
estas kontraŭ ĉiuj, kiuj Lin forlasas. 23 Ni do fastis,
kaj petis nian Dion pri tio; kaj Li aŭskultis nin. 24 Kaj
mi apartigis el la ĉefaj pastroj dek du, kaj mi aligis
al ili Ŝerebjan kaj Ĥaŝabjan kaj dek el iliaj fratoj. 25
Kaj mi pese transdonis al ili la arĝenton kaj la oron
kaj la vazojn, kiuj estis donacitaj por la domo de nia
Dio kaj kiujn donacis la reĝo kaj liaj konsilistoj kaj
liaj princoj, kaj ĉiuj Izraelidoj, kiuj tie troviĝis. 26 Kaj
mi pese transdonis al ili: da arĝento sescent kvindek
kikarojn, da arĝentaj vazoj cent kikarojn, kaj da oro
cent kikarojn; 27 da oraj kalikoj dudek je la sumo de
mil darkemonoj, kaj du vazojn el brilanta plej bona
kupro, multekosta kiel oro. 28 Kaj mi diris al ili: Vi
estas sanktaj al la Eternulo, kaj la vazoj estas sanktaj,
ankaŭ la arĝento kaj la oro, memvole donacitaj al la
Eternulo, Dio de viaj patroj. 29 Maldormu, kaj gardu
tion, ĝis vi transdonos pese al la ĉefaj pastroj, Levidoj,
kaj ĉefoj de patrodomoj de Izrael en Jerusalem, en la
ĉambroj de la domo de la Eternulo. 30 Kaj la pastroj
kaj la Levidoj akceptis la pesitajn arĝenton, oron, kaj
vazojn, por forporti en Jerusalemon en la domon de
nia Dio. 31 Kaj ni ekvojiris de la rivero Ahava en la dek-
dua tago de la unua monato, por iri en Jerusalemon;
kaj la mano de nia Dio estis super ni, kaj Li savis nin
kontraŭ la manoj de malamikoj kaj kontraŭ insidantoj
ĉe la vojo. 32 Kaj ni venis en Jerusalemon kaj restis tie
dum tri tagoj. 33 En la kvara tago la arĝento, oro, kaj
vazoj estis transdonitaj pese en la domon de nia Dio,
en la manojn de la pastro Meremot, filo de Urija, kune
kun Eleazar, filo de Pineĥas, kune kun Jozabad, filo
de Jeŝua, kaj Noadja, filo de Binuj, la Levidoj. 34 Ĉio
estis farita laŭnombre kaj laŭpeze, kaj ĉio pesita estis
tiutempe enskribita. 35 La forkaptitoj, kiuj revenis
el la kaptiteco, alportis bruloferojn al Dio de Izrael:
dek du bovojn, pro la tuta Izrael, naŭdek ses ŝafojn,
sepdek sep ŝafidojn, dek du pekoferajn kaprojn, ĉion
kiel bruloferon al la Eternulo. 36 Kaj oni transdonis
la ordonojn de la reĝo al la satrapoj de la reĝo kaj
al la transriveraj regionestroj; kaj ĉi tiuj subtenis la
popolon kaj la domon de Dio.

9 Kiam ĉio tio estis finita, aliris al mi la estroj, kaj
diris: La popolo Izraela kaj la pastroj kaj la Levidoj
ne apartigis sin de la popoloj de la landoj koncerne
iliajn abomenindaĵojn, de la Kanaanidoj, Ĥetidoj,
Perizidoj, Jebusidoj, Amonidoj, Moabidoj, Egiptoj, kaj
Amoridoj; 2 ĉar ili prenis el iliaj filinoj edzinojn por si
kaj por siaj filoj, kaj miksiĝis la sankta semo kun la
popoloj de la landoj; kaj la mano de la eminentuloj
kaj ĉefoj estis la unua en ĉi tiu malbonago. 3 Kiam mi
aŭdis tion, mi disŝiris miajn vestojn kaj mian tunikon,
mi elŝiris harojn de mia kapo kaj el mia barbo, kaj
mi sidis konsternite. 4 Kaj kolektiĝis al mi ĉiuj, kiuj
timis la vortojn de Dio de Izrael, pro la krimo de la
forkaptitoj; kaj mi sidis konsternite ĝis la vesperofero.
5 Kaj ĉe la vesperofero mi leviĝis de mia aflikto, kaj
kun disŝiritaj vestoj kaj tuniko mi stariĝis surgenue
kaj etendis miajn manojn al la Eternulo, mia Dio, 6 kaj
mi diris: Ho mia Dio, mi hontas, kaj ĝenas min levi
mian vizaĝon al Vi, ho mia Dio; ĉar niaj malbonagoj
kreskis pli alten ol nia kapo, kaj nia kulpo fariĝis

granda ĝis la ĉielo. 7 De post la tempo de niaj patroj
ni estas en granda kulpo ĝis la nuna tago; pro niaj
malbonagoj ni estis transdonitaj, ni kaj niaj reĝoj
kaj niaj pastroj, en la manojn de la alilandaj reĝoj,
sub glavon, en kaptitecon, al disrabo kaj malhonoro,
kiel tio estas nun. 8 Kaj nun antaŭ momento venis
pardono de la Eternulo, nia Dio, kaj Li restigis al
ni saviĝintojn kaj permesis al ni alfortikiĝi sur Lia
sankta loko; nia Dio donis lumon al niaj okuloj, kaj
Li permesis al ni iom reviviĝi en nia sklaveco. 9 Ni
estas ja sklavoj; sed en nia sklaveco nia Dio nin ne
forlasis. Kaj Li donis al ni favorkorecon de la reĝoj
de Persujo, por permesi al ni reviviĝi, por konstrui
la domon de nia Dio kaj restarigi ĝiajn ruinojn, kaj
por doni al ni barilon en Judujo kaj Jerusalem. 10 Kaj
nun kion ni diros, ho nia Dio, post tio? ĉar ni forlasis
Viajn ordonojn, 11 kiujn Vi ordonis per Viaj servantoj,
la profetoj, dirante: La lando, en kiun vi venas por
ekposedi ĝin, estas lando malpura pro la malpureco de
la popoloj alilandaj, pro iliaj abomenindaĵoj, per kiuj
ili plenigis ĝin de rando al rando en sia malpureco; 12
ne donu do viajn filinojn al iliaj filoj, kaj iliajn filinojn
ne prenu por viaj filoj, neniam zorgu pri ilia paco kaj
bonstato, por ke vi fortiĝu kaj por ke vi nutru vin
per la bonaĵoj de la tero kaj por ke vi heredigu ĝin
por eterne al viaj filoj. 13 Kaj post ĉio, kio trafis nin
pro niaj malbonaj faroj kaj pro nia granda kulpo, kaj
kiam nun Vi indulgis nin malgraŭ niaj malbonagoj kaj
donis al ni tian saviĝon, 14 ĉu ni nun denove malobeu
Viajn ordonojn, kaj boparenciĝu kun la popoloj de
tiuj abomenindaĵoj? Ĉu Vi ne koleros kontraŭ ni ĝis
plena ekstermo sen restigo de ia restaĵo kaj savitaĵo?
15 Ho Eternulo, Dio de Izrael! Vi estas justa; ĉar ni
restis saviĝintoj ĝis la nuna tago. Jen ni estas antaŭ Vi
en nia kulpo; ni ne povas teni nin antaŭ Vi pro tio.

10 Kiam Ezra preĝis kaj faris konfeson, plorante kaj
kuŝante antaŭ la domo de Dio, kolektiĝis al li
el la Izraelidoj tre granda amaso, viroj, virinoj, kaj
infanoj; ĉar ankaŭ la popolo tre multe ploris. 2 Kaj
ekparolis Ŝeĥanja, filo de Jeĥiel, el la idoj de Elam,
kaj diris al Ezra: Ni faris krimon kontraŭ nia Dio,
prenante edzinojn aligentajn el la popoloj de la lando.
Tamen nun ekzistas espero por Izrael en ĉi tiu afero.
3 Nun ni faru interligon kun nia Dio, ke laŭ la konsilo
de mia sinjoro, kaj de tiuj, kiuj havas timon antaŭ
la ordonoj de nia Dio, ni forigos ĉiujn virinojn kaj
iliajn naskitojn, kaj estu farite konforme al la leĝo. 4
Leviĝu, ĉar vi devas okupi vin pri tio, kaj ni estos kun
vi; estu kuraĝa, kaj agu. 5 Tiam Ezra leviĝis, kaj ĵurigis
la ĉefajn pastrojn, la Levidojn, kaj la tutan Izraelon,
ke ili agos tiel; kaj ili ĵuris. 6 Kaj Ezra leviĝis de antaŭ
la domo de Dio, kaj iris al la ĉambro de Jehoĥanan,
filo de Eljaŝib, kaj eniris tien. Panon li ne manĝis
kaj akvon li ne trinkis, ĉar li funebris pri la krimo
de la kaptitecanoj. 7 Kaj oni proklamis en Judujo
kaj Jerusalem al ĉiuj, kiuj venis el la kaptiteco, ke ili
kolektiĝu en Jerusalem, 8 kaj ke al ĉiu, kiu ne venos
tien post paso de tri tagoj, laŭ decido de la estroj kaj
plejaĝuloj estos anatemita lia tuta havo, kaj li estos
ekskomunikita el la komunumo de la reenmigrintoj. 9
Kaj kolektiĝis ĉiuj idoj de Jehuda kaj de Benjamen en
Jerusalem post tri tagoj. Tio estis en la naŭa monato,
en la dudeka tago de la monato. Kaj la tuta popolo
sidis sur la placo antaŭ la domo de Dio, tremante pro
ĉi tiu afero kaj pro pluvo. 10 Kaj leviĝis Ezra, la pastro,
kaj diris al ili: Vi faris krimon, prenante aligentajn
edzinojn kaj pligrandigante la kulpon de Izrael. 11 Tial
faru nun konfeson al la Eternulo, Dio de viaj patroj,
kaj plenumu Lian volon: apartigu vin de la popoloj
de la lando kaj de la aligentaj edzinoj. 12 Kaj la tuta
komunumo respondis kaj diris per laŭta voĉo: Jes,
kiel vi diras, tiel estu farite. 13 Tamen la popolo estas
grandnombra, kaj la tempo nun estas pluva, kaj ni ne
havas forton, por stari sur la strato; cetere tio ne estas
afero de unu tago aŭ de du, ĉar ni multe pekis en tiu
afero. 14 Niaj estroj do stariĝu pro la tuta komunumo,
kaj ĉiuj en niaj urboj, kiuj prenis aligentajn edzinojn,
venu en difinita tempo, kaj kun ili la plejaĝuloj de ĉiu
urbo kaj ĝiaj juĝistoj, ĝis oni forturnos de ni la flaman
koleron de nia Dio pro tiu afero. 15 Sed Jonatan, filo
de Asahel, kaj Jaĥzeja, filo de Tikva, kontraŭstaris
tion, kaj Meŝulam, kaj Ŝabtaj, la Levido, helpis ilin. 16
Kaj tiel faris la revenintoj el la kaptiteco. Kaj apartiĝis
por tio la pastro Ezra kaj ĉefoj de patrodomoj laŭ iliaj
patrodomoj, ĉiuj laŭnome; kaj ili sidiĝis en la unua
tago de la deka monato, por esplori la aferon. 17 Kaj
ĝis la unua tago de la unua monato ili finis la aferon
pri ĉiuj viroj, kiuj prenis aligentajn edzinojn. 18 Kaj
troviĝis el la pastridoj, kiuj prenis aligentajn edzinojn,
el la filoj de Jeŝua, filo de Jocadak, kaj el liaj fratoj:
Maaseja, Eliezer, Jarib, kaj Gedalja. 19 Kaj ili donis sian
manon, ke ili forigos siajn edzinojn, kaj ke ili alportos
pro sia kulpo virŝafon kiel kulpoferon. 20 Kaj el la filoj

de Imer: Ĥanani kaj Zebadja; 21 el la filoj de Ĥarim:
Maaseja, Elija, Ŝemaja, Jeĥiel, kaj Uzija; 22 el la filoj de
Paŝĥur: Eljoenaj, Maaseja, Iŝmael, Netanel, Jozabad,
kaj Eleasa; 23 kaj el la Levidoj: Jozabad, Ŝimei, Kelaja
(ankaŭ nomata Kelita), Petaĥja, Jehuda, kaj Eliezer;
24 el la kantistoj: Eljaŝib; el la pordegistoj: Ŝalum,
Telem, kaj Uri; 25 el la Izraelidoj: el la filoj de Paroŝ:
Ramja, Jizija, Malkija, Mijamin, Eleazar, Malkija, kaj
Benaja; 26 el la filoj de Elam: Matanja, Zeĥarja, Jeĥiel,
Abdi, Jeremot, kaj Elija; 27 el la filoj de Zatu: Eljoenaj,
Eljaŝib, Matanja, Jeremot, Zabad, kaj Aziza; 28 el la
filoj de Bebaj: Jehoĥanan, Ĥananja, Zabaj, Atlaj; 29 el
la filoj de Bani: Meŝulam, Maluĥ, Adaja, Jaŝub, Ŝeal,
kaj Ramot; 30 el la filoj de Paĥat-Moab: Adna, Kelal,
Benaja, Maaseja, Matanja, Becalel, Binuj, kaj Manase;
31 el la filoj de Ĥarim: Eliezer, Jiŝija, Malkija, Ŝemaja,
Ŝimeon, 32 Benjamen, Maluĥ, Ŝemarja; 33 el la filoj
de Ĥaŝum: Matnaj, Matata, Zabad, Elifelet, Jeremaj,
Manase, Ŝimei; 34 el la filoj de Bani: Maadaj, Amram,
Uel, 35 Benaja, Bedja, Keluhu, 36 Vanja, Meremot,
Eljaŝib, 37 Matanja, Matnaj, Jaasaj, 38 Bani, Binuj,
Ŝimei, 39 Ŝelemja, Natan, Adaja, 40 Maĥnadbaj, Ŝaŝaj,
Ŝaraj, 41 Azarel, Ŝelemja, Ŝemarja, 42 Ŝalum, Amarja,
Jozef; 43 el la filoj de Nebo: Jeiel, Matitja, Zabad,
Zebina, Jadaj, Joel, Benaja. 44 Ĉiuj tiuj prenis edzinojn
aligentajn; kelkaj el tiuj edzinoj naskis infanojn.

# Neĥemja

**1** Vortoj de Neĥemja, filo de Ĥaĥalja. En la monato
Kislev, en la dudeka jaro, mi estis en la kastelurbo
Ŝuŝan. 2 Kaj venis Ĥanani, unu el miaj fratoj, li kaj
kelkaj viroj el Judujo. Kaj mi demandis lin pri la
Judoj, kiuj saviĝis kaj restis el la forkaptitaro, kaj pri
Jerusalem. 3 Kaj ili diris al mi: La restintoj, kiuj restis
el la forkaptitaro, troviĝas tie en la lando en granda
mizero kaj malhonoro; kaj la murego de Jerusalem
estas detruita, kaj ĝiaj pordegoj estas forbruligitaj per
fajro. 4 Kiam mi aŭdis tiujn vortojn, mi sidiĝis kaj
ekploris, kaj funebris dum kelke da tagoj; kaj mi fastis
kaj preĝis antaŭ Dio de la ĉielo. 5 Kaj mi diris: Mi
petas Vin, ho Eternulo, Dio de la ĉielo, Dio granda kaj
timinda, kiu konservas la interligon kaj favorkorecon
al Liaj amantoj kaj al la plenumantoj de Liaj ordonoj! 6
Via orelo estu atenta, kaj Viaj okuloj estu malfermitaj,
por aŭskulti la preĝon de Via servanto, per kiu mi
preĝas antaŭ Vi nun tage kaj nokte pri la Izraelidoj,
Viaj servantoj, dum mi faras konfeson pri la pekoj
de la Izraelidoj, kiujn ni pekis antaŭ Vi; mi kaj la
domo de mia patro, ni pekis. 7 Ni forte pekis antaŭ
Vi, kaj ni ne plenumis la ordonojn kaj la leĝojn kaj la
decidojn, kiujn Vi ordonis al Moseo, Via servanto. 8
Sed volu rememori la vorton, kiun Vi eldiris al Via
servanto Moseo, nome: Se vi pekos, Mi disĵetos vin
inter la popolojn; 9 sed se vi returnos vin al Mi kaj
konservos Miajn ordonojn kaj plenumos ilin, tiam se
viaj forpelitoj eĉ estus ĉe la rando de la ĉielo, Mi eĉ de
tie kolektos ilin, kaj venigos ilin sur la lokon, kiun
Mi elektis, por loĝigi tie Mian nomon. 10 Ili estas ja
Viaj servantoj, kaj Via popolo, kiun Vi liberigis per
Via granda forto kaj per Via potenca mano. 11 Mi
petas, ho Sinjoro, Via orelo estu atenta al la preĝo de
Via servanto, kaj al la preĝo de Viaj servantoj, kiuj
deziras timi Vian nomon; kaj donu sukceson al Via
servanto hodiaŭ, kaj akirigu al li favorkorecon antaŭ
ĉi tiu homo. (Mi estis vinverŝisto ĉe la reĝo.)

**2** En la monato Nisan, en la dudeka jaro de la reĝo
Artaĥŝast, antaŭ li staris vino. Kaj mi prenis la
vinon kaj donis al la reĝo; kaj ĝis tiam mi ne estis
malgaja antaŭ li. 2 Kaj la reĝo diris al mi: Kial vi
aspektas malbone, kvankam vi ne estas malsana? tio
certe estas doloro de koro. Kaj mi forte ektimis, 3
kaj mi diris al la reĝo: La reĝo vivu eterne; kiel mi
povas ne aspekti malbone, kiam la urbo, kiu estas la
tomboloko de miaj patroj, estas dezertigita, kaj ĝiaj
pordegoj estas forbruligitaj per fajro? 4 Kaj la reĝo
diris al mi: Kion do vi deziras? Tiam mi preĝis al Dio
de la ĉielo, 5 kaj diris al la reĝo: Se al la reĝo plaĉas,
kaj se via sklavo havas vian favoron, permesu al mi
veturi en Judujon, en la urbon, kie troviĝas la tomboj
de miaj patroj, kaj konstrui ĝin. 6 Kaj la reĝo diris
al mi (la reĝino sidis apud li): Kiel longe daŭros via
veturado? kaj kiam vi revenos? Kaj la reĝo bonvolis
forliberigi min, kaj mi difinis al li templimon. 7 Kaj mi
diris al la reĝo: Se al la reĝo plaĉas, oni donu al mi
leterojn al la transriveraj regionestroj, ke ili permesu
al mi trairi, ĝis mi venos en Judujon; 8 kaj ankaŭ
leteron al Asaf, la gardisto de la reĝa arbaro, ke li
donu al mi arbojn por tegi la pordegojn de la kastelo
ĉe la templo, kaj por la murego de la urbo, kaj por la
domo, en kiu mi loĝos. Kaj la reĝo donis al mi, ĉar
super mi estis la favora mano de mia Dio. 9 Kaj mi
venis al la transriveraj regionestroj, kaj mi donis al
ili la leterojn de la reĝo. Kaj la reĝo sendis kun mi
oficirojn kaj rajdistojn. 10 Kiam tion aŭdis Sanbalat,
la Ĥoronano, kaj Tobija, la sklavo Amonida, ili havis
grandan ĉagrenon, ke venis homo, por zorgi pri la
bono de la Izraelidoj. 11 Kaj mi venis en Jerusalemon.
Kaj restinte tie dum tri tagoj, 12 mi leviĝis nokte kune
kun nemultaj homoj, kiuj estis kun mi; mi al neniu
ion diris pri tio, kion mia Dio inspiris al mi fari por
Jerusalem; neniu besto estis kun mi, krom tiu, sur
kiu mi rajdis. 13 Kaj mi trarajdis nokte tra la Pordego
de la Valo, al la Fonto de la Drako kaj al la Pordego
de Sterko; mi rigardis la muregojn de Jerusalem, kiel
detruitaj ili estas, kaj ĝiajn pordegojn, kiel ili estas
forbruligitaj per fajro. 14 Kaj mi alrajdis al la Pordego
de la Fonto kaj al la Reĝa Lageto; sed tie ne estis sufiĉe
da spaco, ke povu trairi la besto, kiu estis sub mi.
15 Kaj mi leviĝis nokte laŭ la torento kaj pririgardis
la muregon, kaj, trarajdinte denove tra la Pordego
de la Valo, mi revenis. 16 Kaj la estroj ne sciis, kien
mi iris kaj kion mi faras; nek al la Judoj, nek al la
pastroj, nek al la eminentuloj, nek al la estroj, nek
al la ceteraj plenumantoj de la laboroj mi ion diris
ĝis nun. 17 Kaj mi diris al ili: Vi vidas la mizeron, en
kiu ni troviĝas, kiel Jerusalem estas dezertigita kaj
ĝiaj pordegoj estas forbruligitaj per fajro; ni iru kaj
konstruu la muregon de Jerusalem, ke ni ne estu plu
en malhonoro. 18 Kaj mi rakontis al ili pri la mano de

mia Dio, kiu favore estis super mi, ankaŭ la vortojn
de la reĝo, kiujn li diris al mi. Kaj ili diris: Ni leviĝu
kaj konstruu; kaj iliaj manoj fortiĝis por la bono. 19
Kiam tion aŭdis Sanbalat, la Ĥoronano, kaj Tobija,
la sklavo Amonida, kaj Geŝem, la Arabo, ili ridis pri
ni kaj rigardis nin malestime, kaj diris: Kio estas tiu
afero, kiun vi faras? ĉu ne kontraŭ la reĝo vi ribelas?
20 Kaj mi respondis al ili, kaj diris al ili: Dio de la ĉielo
donos al ni sukceson, kaj ni, Liaj servantoj, leviĝos kaj
konstruos; sed vi havas nenian parton nek rajton nek
memoron en Jerusalem.

3 Kaj leviĝis la ĉefpastro Eljaŝib, kaj liaj fratoj, la
pastroj, kaj konstruis la Pordegon de Ŝafoj; ili
sanktigis ĝin kaj starigis ĝiajn pordojn, ili sanktigis ĝis
la turo Mea, ĝis la turo Ĥananel. 2 Apud li konstruis la
loĝantoj de Jeriĥo, apud ili konstruis Zakur, filo de
Imri. 3 La Pordegon de Fiŝoj konstruis la loĝantoj de
Senaa; ili tegis ĝin, kaj starigis ĝiajn pordojn, serurojn,
kaj riglilojn. 4 Apud ili konstruis Meremot, filo de
Urija, filo de Hakoc; apud ili konstruis Meŝulam,
filo de Bereĥja, filo de Meŝezabel; apud ili konstruis
Cadok, filo de Baana. 5 Apud ili konstruis la Tekoaanoj;
tamen iliaj eminentuloj ne metis sian kolon sub
laboradon por sia sinjoro. 6 La Malnovan Pordegon
konstruis Jojada, filo de Paseaĥ, kaj Meŝulam, filo
de Besodja; ili tegis ĝin, kaj starigis ĝiajn pordojn,
ĝiajn serurojn, kaj ĝiajn riglilojn. 7 Apud ili konstruis
Melatja, la Gibeonano, kaj Jadon, la Meronotano, la
loĝantoj de Gibeon kaj de Micpa, ĝis la seĝo de la
transrivera regionestro. 8 Apud li konstruis Uziel,
filo de Ĥarhaja, fandisto; apud li konstruis Ĥananja,
filo de ŝmiraĵisto. Kaj ili restarigis Jerusalemon ĝis la
Larĝa Murego. 9 Apud ili konstruis Refaja, filo de Ĥur,
estro de duondistrikto de Jerusalem. 10 Apud ili kaj
kontraŭ sia domo konstruis Jedaja, filo de Ĥarumaf;
apud li konstruis Ĥatuŝ, filo de Ĥaŝabneja. 11 Alian
parton konstruis Malkija, filo de Ĥarim, kaj Ĥaŝub,
filo de Paĥat-Moab; ankaŭ la Turon de la Fornoj.
12 Apude konstruis Ŝalum, filo de Haloĥeŝ, estro de
duondistrikto de Jerusalem, li kaj liaj filinoj. 13 La
Pordegon de la Valo konstruis Ĥanun kaj la loĝantoj
de Zanoaĥ; ili konstruis ĝin, kaj starigis ĝiajn pordojn,
ĝiajn serurojn, kaj ĝiajn riglilojn, kaj mil ulnojn de la
murego ĝis la Pordego de Sterko. 14 La Pordegon de
Sterko konstruis Malkija, filo de Reĥab, estro de la
distrikto de Bet-Kerem; li konstruis ĝin, kaj starigis
ĝiajn pordojn, serurojn, kaj riglilojn. 15 La Pordegon
de la Fonto konstruis Ŝalun, filo de Kol-Ĥoze, estro de
la distrikto de Micpa; li konstruis ĝin kaj tegis ĝin, kaj
starigis ĝiajn pordojn, serurojn, kaj riglilojn; ankaŭ
la muregon ĉe la lageto Ŝelaĥ de la reĝa ĝardeno
kaj ĝis la ŝtupoj, kiuj iras malsupren de la urbo de
David. 16 Post li konstruis Neĥemja, filo de Azbuk,
estro de duondistrikto de Bet-Cur, ĝis la loko kontraŭ
la tomboj de David kaj ĝis la farita lageto kaj ĝis
la Domo de Herooj. 17 Post li konstruis la Levidoj:
Reĥum, filo de Bani; apude konstruis Ĥaŝabja, estro
de duondistrikto de Keila, por sia distrikto. 18 Post li
konstruis iliaj fratoj, Bavaj, filo de Ĥenadad, estro de
duondistrikto de Keila. 19 Apud li konstruis Ezer, filo
de Jeŝua, estro de Micpa, duan parton, ĉe la angulo,
kontraŭ la loko, kie oni supreniras al la armilejo.
20 Post li vigle konstruis Baruĥ, filo de Zakaj, alian
parton, de la angulo ĝis la pordo de la domo de Eljaŝib,
la ĉefpastro. 21 Post li konstruis Meremot, filo de
Urija, filo de Hakoc, alian parton, de la pordo de la
domo de Eljaŝib ĝis la fino de la domo de Eljaŝib. 22
Post li konstruis la pastroj, kiuj loĝis en la ĉirkaŭaĵo.
23 Post ili konstruis Benjamen kaj Ĥaŝub, kontraŭ
sia domo; post ili konstruis Azarja, filo de Maaseja,
filo de Ananja, apud sia domo. 24 Post li konstruis
Binuj, filo de Ĥenadad, alian parton, de la domo de
Azarja ĝis la angulo kaj la rando. 25 Palal, filo de Uzaj,
de kontraŭ la angulo kaj la turo, kiu elstaras el la
supra reĝa domo, apud la korto de malliberejo. Post
li Pedaja, filo de Paroŝ 26 (La Netinoj loĝis en Ofel.)
ĝis kontraŭ la Pordego de la Akvo oriente, kaj ĝis la
elstaranta turo. 27 Poste konstruis la Tekoaanoj, alian
parton, de kontraŭ la granda elstaranta turo ĝis la
muro de Ofel. 28 De post la Pordego de la Ĉevaloj
konstruis la pastroj, ĉiu kontraŭ sia domo. 29 Poste
konstruis Cadok, filo de Imer, kontraŭ sia domo; post
li konstruis Ŝemaja, filo de Ŝeĥanja, gardisto de la
Orienta Pordego. 30 Post li konstruis Ĥananja, filo de
Ŝelemja, kaj Ĥanun, sesa filo de Calaf, alian parton.
Post li konstruis Meŝulam, filo de Bereĥja, kontraŭ sia
ĉambro. 31 Post li konstruis Malkija, filo de fandisto,
ĝis la domo de la Netinoj kaj de la butikistoj, kontraŭ
la Pordego de Depono kaj ĝis la tegmenta ĉambro de
la angulo. 32 Inter la tegmenta ĉambro de la angulo
kaj la Pordego de Ŝafoj konstruis la fandistoj kaj la
butikistoj.

4 Kiam Sanbalat aŭdis, ke ni konstruas la muregon, li
koleris kaj havis grandan ĉagrenon, kaj li mokis la
Judojn. 2 Kaj li parolis antaŭ siaj fratoj kaj antaŭ la
militistoj de Samario, kaj diris: Kion faras tiuj senfortaj
Judoj? ĉu oni tion permesos al ili? ĉu efektive ili
alportados oferojn? ĉu ili iam finos? ĉu ili revivigos la
ŝtonojn, kiuj fariĝis amaso da rubo kaj estas difektitaj
de brulo? 3 Kaj Tobija, la Amonido, kiu estis apud li,
diris: Eĉ tio, kion ili konstruas, estas tia, ke se venos
vulpo, ĝi detruos ilian ŝtonan muregon. 4 Aŭskultu,
ho nia Dio, en kia malestimo ni troviĝas; reĵetu ilian
mokadon sur ilian kapon, kaj elmetu ilin al prirabado
en lando de kaptiteco; 5 ne kovru ilian malbonagon,
kaj ilia peko ne elviŝiĝu antaŭ Vi; ĉar ili ĉagrenis la
konstruantojn. 6 Ni tamen konstruis la muregon, kaj
la tuta murego estis jam kunmetita ĝis duono; kaj la
popolo laboris kuraĝe. 7 Kiam Sanbalat kaj Tobija kaj
la Araboj kaj la Amonidoj kaj la Aŝdodanoj aŭdis, ke la
muregoj de Jerusalem estas riparataj kaj ke la breĉoj
komencis esti fermataj, ili tre ekkoleris. 8 Kaj ili faris
interkonsenton, ke ili ĉiuj kune iru milite kontraŭ
Jerusalemon kaj faru al ĝi malbonon. 9 Sed ni preĝis
al nia Dio, kaj ni starigis pro ili gardon tage kaj nokte
kontraŭ ili. 10 La Judoj diris: Malgrandiĝis la forto de
la portistoj, kaj da rubo estas multe; kaj ni ne povas
konstrui la muregon. 11 Kaj niaj malamikoj diris: Ili
ne scios kaj ne vidos, ĝis ni venos en ilian mezon
kaj mortigos ilin kaj ĉesigos la laboradon. 12 Kiam
la Judoj, kiuj loĝis apud ili, venadis, kaj diradis al ni,
dekfoje, el ĉiuj lokoj: Revenu al ni, 13 tiam mi starigis
malsupre sur la lokoj malantaŭ la murego, sur la
nekovritaj lokoj, mi starigis la popolon laŭfamilie, kun
iliaj glavoj, lancoj, kaj pafarkoj. 14 Kaj mi pririgardis,
kaj mi stariĝis, kaj diris al la eminentuloj kaj al la
estroj kaj al la cetera popolo: Ne timu ilin; memoru pri
la Sinjoro, la granda kaj timinda, kaj batalu por viaj
fratoj, viaj filoj, viaj filinoj, viaj edzinoj, kaj viaj domoj.
15 Kiam niaj malamikoj aŭdis, ke ni scias, tiam Dio
detruis ilian intencon, kaj ni ĉiuj revenis al la murego,
ĉiu al sia laboro. 16 Kaj de post tiu tago duono de miaj
junuloj faradis la laboron, kaj duono tenis lancojn,
ŝildojn, pafarkojn, kaj kirasojn; kaj la estroj troviĝadis
malantaŭ la tuta domo de Jehuda. 17 Unuj konstruis la
muregon, kaj aliaj portis la ŝarĝojn, kiujn ili metis sur
sin; per unu mano ĉiu faris la laboron, kaj en la dua
mano li tenis batalilon. 18 La konstruantoj ĉiuj havis
sian glavon alligitan al siaj lumboj, kaj tiamaniere ili
konstruis; kaj la trumpetisto estis apud mi. 19 Kaj mi
diris al la eminentuloj kaj al la estroj kaj al la cetera
popolo: La laboro estas granda kaj vasta, kaj ni estas
disigitaj sur la murego, malproksime unu de la alia; 20
tial se de iu loko vi aŭdos la sonon de trumpeto, tien
kolektiĝu al ni; nia Dio batalos por ni. 21 Tiamaniere
ni faradis la laboron; kaj duono de ili tenis lancojn de
la leviĝo de la ĉielruĝo ĝis la apero de la steloj. 22 Kaj
mi ankaŭ diris en tiu tempo al la popolo, ke ĉiu kun
sia knabo noktu en Jerusalem, por ke ili estu por ni
nokte kiel gardo, kaj tage ili laboru. 23 Kaj nek mi,
nek miaj fratoj, nek miaj knaboj, nek la gardistoj, kiuj
estis malantaŭ mi, neniu el ni deprenis de si siajn
vestojn; nur ĉiu aparte estis sendata, por sin bani.

5 Kaj la popolo kaj iliaj edzinoj komencis forte krii
kontraŭ siaj fratoj, la Judoj. 2 Estis tiaj, kiuj parolis:
Estas multe da ni kaj da niaj filoj kaj filinoj; ni prenu
al ni grenon kaj manĝu, por ke ni vivu. 3 Aliaj
parolis: Niajn kampojn, niajn vinberĝardenojn, kaj
niajn domojn ni donas proprunte, por ke ni akiru
grenon kontraŭ malsato. 4 Aliaj parolis: Ni pruntas
monon por impostoj por la reĝo, donante garantiaĵe
niajn kampojn kaj vinberĝardenojn; 5 sed kiel la
korpo de niaj fratoj, tia estas nia korpo, kiel iliaj
infanoj, tiaj estas niaj infanoj; tamen jen ni devas
humile servigi niajn filojn kaj niajn filinojn, kaj el niaj
filinoj kelkaj jam estas humiligitaj. Ni ne havas forton
en niaj manoj, kaj niaj kampoj kaj vinberĝardenoj
apartenas al aliaj. 6 Kaj tio forte min ĉagrenis, kiam
mi aŭdis ilian kriadon kaj tiujn vortojn. 7 Sed mia koro
donis al mi konsilon, kaj mi faris severan riproĉon
al la eminentuloj kaj al la estroj, kaj diris al ili: Vi
prenas procentegon de viaj fratoj! Kaj mi kunvokis
kontraŭ ili grandan kunvenon. 8 Kaj mi diris al ili: Ni
elaĉetis niajn fratojn, la Judojn, kiuj estis venditaj al
la nacioj, kiom ni povis; dume vi volas vendi viajn
fratojn, kaj ili estas vendataj al ni! Ili silentis kaj trovis
nenion por respondi. 9 Kaj mi diris: Ne bona estas
tio, kion vi faras. Ĉu vi ne devas konduti kun timo
antaŭ nia Dio, por eviti malhonoron de la flanko de la
nacioj, niaj malamikoj? 10 Ankaŭ mi kaj miaj fratoj kaj
miaj junuloj donis al ili prunte monon kaj grenon; ni
malŝuldigu al ili tiun ŝuldon. 11 Redonu do al ili hodiaŭ
iliajn kampojn, vinberĝardenojn, olivĝardenojn, kaj
domojn, kaj la procenton pro la mono, la greno, la
mosto, kaj la oleo, kiujn vi pruntis al ili. 12 Kaj ili

diris: Ni redonos, kaj ni ne postulos de ili; ni agos
tiel, kiel vi diras. Kaj mi alvokis la pastrojn, kaj mi
prenis de ili ĵuron, ke ili tiel agos. 13 Kaj mi elskuis
mian baskon, kaj diris: Tiele Dio elskuu el lia domo
kaj el lia akiritaĵo ĉiun homon, kiu ne plenumos tiun
vorton; tiele li estu elskuita kaj senhava. Kaj la tuta
komunumo diris: Amen; kaj oni gloris la Eternulon.
Kaj la popolo agis tiele. 14 Krom tio, de post la tago,
kiam al mi estis ordonite esti ilia regionestro en la
Juda lando, de la dudeka jaro ĝis la tridek-dua jaro de
la reĝo Artaĥŝast, en la daŭro de dek du jaroj, mi kun
miaj fratoj ne manĝis la panon de regionestro. 15 La
antaŭaj regionestroj, kiuj estis antaŭ mi, ŝarĝadis la
popolon, kaj prenadis de ili panon kaj vinon, krom
kvardek sikloj da arĝento; eĉ iliaj junuloj regis super la
popolo. Sed mi ne agis tiel, pro timo antaŭ Dio. 16 Mi
partoprenis ankaŭ en la laborado ĉe tiu murego; kaj
kampon ni ne aĉetis; kaj ĉiuj miaj junuloj kolektiĝadis
tie al la laboro. 17 Ĉe mia tablo estadis po cent kvindek
homoj da Judoj kaj estroj, kaj ankaŭ da tiuj, kiuj venis
al ni el la nacioj, kiuj estas ĉirkaŭ ni. 18 Preparataj
estis por unu tago: unu bovo, ses plej bonaj ŝafoj, kaj
ankaŭ birdoj estis preparataj ĉe mi; kaj en la daŭro de
dek tagoj estis uzata tre multe da vino. Malgraŭ tio
mi ne postulis panon de regionestro, ĉar la popolo
estis ŝarĝita de malfacila laboro. 19 Rememoru pri
mi al bono, ho mia Dio, ĉion, kion mi faris por ĉi tiu
popolo.

**6** Kiam Sanbalat, Tobija, la Arabo Geŝem, kaj niaj
ceteraj malamikoj aŭdis, ke mi rekonstruis la
muregon kaj ke ne restis en ĝi difektoj (kvankam
ĝis tiu tempo mi ankoraŭ ne starigis pordojn en la
pordegoj), 2 tiam Sanbalat kaj Geŝem sendis, por
diri al mi: Venu, ni kune kunvenu en la vilaĝoj de
la valo Ono. Ili intencis fari al mi malbonon. 3 Sed
mi sendis al ili senditojn, por diri: Mi faras grandan
laboron, kaj mi ne povas iri; kial ĉesiĝu la laborado,
kiam mi ĝin forlasos kaj iros al vi? 4 Kaj ili sendis al
mi la saman proponon kvar fojojn, kaj mi respondis
tion saman. 5 Kaj Sanbalat sendis al mi kun la sama
propono la kvinan fojon sian junulon, kiu havis en
sia mano nefermitan leteron. 6 En ĝi estis skribite:
Inter la nacioj iras la famo, kaj Geŝem diras, ke vi
kaj la Judoj intencas defali; por tio vi konstruas la
muregon; kaj laŭ tiu famo vi volas esti ilia reĝo. 7
Ankaŭ profetojn vi starigis, por ke ili prediku pri vi
en Jerusalem, dirante: Estas reĝo en Judujo. Nun la
famo pri tio venos al la reĝo; venu do, ke ni kune
interkonsiliĝu. 8 Sed mi sendis al li, por diri: Nenio
fariĝis el tio, kion vi diras; vi mem tion elpensis. 9 Ili
ĉiuj ja timigis nin, pensante: Ili ellasos el siaj manoj
la laboron, kaj ĝi ne estos farata. Sed nun fortiĝu
miaj manoj. 10 Kaj mi venis en la domon de Ŝemaja,
filo de Delaja, filo de Mehetabel; li sin enŝlosis. Kaj li
diris: Ni iru kune en la domon de Dio, en la mezon
de la templo, kaj ni ŝlosu la pordojn de la templo;
ĉar oni venos, por mortigi vin, en la nokto oni venos,
por mortigi vin. 11 Sed mi diris: Ĉu tia homo, kiel
mi, forkuru? ĉu tia, kiel mi, iru en la templon, por
konservi la vivon? mi ne iros. 12 Mi komprenis, ke ne
Dio lin sendis; ĉar la profetaĵon li eldiris pri mi pro
tio, ke Tobija kaj Sanbalat lin subaĉetis. 13 Li estis
subaĉetita, por ke mi timu, por ke mi agu tiel kaj
peku. Tio donus al ili pretekston por malbona famo,
por ke ili min malhonoru. 14 Rememoru, ho mia Dio,
pri Tobija kaj Sanbalat tiujn iliajn farojn, ankaŭ pri
la profetino Noadja, kaj la aliaj profetoj, kiuj timigis
min. 15 La murego estis finita en la dudek-kvina tago
de la monato Elul, en la daŭro de kvindek du tagoj.
16 Kiam tion aŭdis ĉiuj niaj malamikoj, kaj vidis ĉiuj
nacioj, kiuj estis ĉirkaŭ ni, ili multe perdis la kuraĝon;
ĉar ili komprenis, ke tiu laboro estas farita de nia
Dio. 17 Krom tio, en tiuj tagoj la eminentuloj el la
Judoj skribis multe da leteroj al Tobija, kaj leteroj de
Tobija venis al ili; 18 ĉar multaj el la Judoj estis en ĵura
ligo kun li, ĉar li estis bofilo de Ŝeĥanja, filo de Araĥ,
kaj lia filo Jehoĥanan prenis por edzino filinon de
Meŝulam, filo de Bereĥja. 19 Ili ankaŭ paroladis bone
pri li antaŭ mi, kaj miajn vortojn ili transdonadis al li.
Tobija sendis leterojn, por timigi min.

**7** Kiam la murego estis konstruita, mi starigis la
pordojn; kaj ricevis siajn oficojn la pordegistoj,
la kantistoj, kaj la Levidoj. 2 Kaj mi donis ordonon
al mia frato Ĥanani, kaj al Ĥananja, kastelestro de
Jerusalem (ĉar li estis homo fidela, kaj diotima pli ol
multaj aliaj), 3 kaj mi diris al ili: Oni ne malfermu la
pordegojn de Jerusalem, antaŭ ol la suno estos bone
varmiga; kaj tiel longe, kiel ili staras, ili restigu la
pordegojn fermitaj kaj ŝlositaj; kaj oni starigu gardon
el la loĝantoj de Jerusalem, ĉiun sur lia gardoloko kaj
ĉiun kontraŭ lia domo. 4 Sed la urbo estis vasta kaj
granda, kaj da loĝantoj estis en ĝi nemulte, kaj la
domoj ne estis konstruitaj. 5 Kaj mia Dio min inspiris,

kaj mi kunvenigis la eminentulojn kaj la estrojn kaj la
popolon, por ilin registri. Kaj mi trovis la genealogian
registron de tiuj, kiuj venis antaŭe, kaj mi trovis, ke
en ĝi estas skribite jene: 6 Jen estas la loĝantoj de
la lando, kiuj iris el la forkaptitoj, kiujn forkondukis
Nebukadnecar, reĝo de Babel, kaj kiuj revenis en
Jerusalemon kaj en Judujon, ĉiu en sian urbon, 7 kiuj
venis kun Zerubabel, Jeŝua, Neĥemja, Azarja, Raamja,
Naĥamani, Mordeĥaj, Bilŝan, Misperet, Bigvaj, Neĥum,
Baana. La nombro de la viroj de la popolo Izraela
estis: 8 de la idoj de Paroŝ, du mil cent sepdek du, 9
de la idoj de Ŝefatja, tricent sepdek du, 10 de la idoj
de Araĥ, sescent kvindek du, 11 de la idoj de Paĥat-
Moab, el la idoj de Jeŝua kaj Joab, du mil okcent dek
ok, 12 de la idoj de Elam, mil ducent kvindek kvar,
13 de la idoj de Zatu, okcent kvardek kvin, 14 de la
idoj de Zakaj, sepcent sesdek, 15 de la idoj de Binuj,
sescent kvardek ok, 16 de la idoj de Bebaj, sescent
dudek ok, 17 de la idoj de Azgad, du mil tricent dudek
du, 18 de la idoj de Adonikam, sescent sesdek sep,
19 de la idoj de Bigvaj, du mil sesdek sep, 20 de la
idoj de Adin, sescent kvindek kvin, 21 de la idoj de
Ater, el la domo de Ĥizkija, naŭdek ok, 22 de la idoj
de Ĥaŝum, tricent dudek ok, 23 de la idoj de Becaj,
tricent dudek kvar, 24 de la idoj de Ĥarif, cent dek du,
25 de la idoj de Gibeon, naŭdek kvin, 26 de la loĝantoj
de Bet-Leĥem kaj de Netofa, cent okdek ok, 27 de la
loĝantoj de Anatot, cent dudek ok, 28 de la loĝantoj de
Bet-Azmavet, kvardek du, 29 de la loĝantoj de Kirjat-
Jearim, Kefira, kaj Beerot, sepcent kvardek tri, 30 de
la loĝantoj de Rama kaj Geba, sescent dudek unu,
31 de la loĝantoj de Miĥmas, cent dudek du, 32 de
la loĝantoj de Bet-El kaj Aj, cent dudek tri, 33 de la
loĝantoj de Nebo-Aĥer, kvindek du, 34 de la idoj de la
alia Elam, mil ducent kvindek kvar, 35 de la idoj de
Ĥarim, tricent dudek, 36 de la idoj de Jeriĥo, tricent
kvardek kvin, 37 de la idoj de Lod, Ĥadid, kaj Ono,
sepcent dudek unu, 38 de la idoj de Senaa, tri mil
naŭcent tridek. 39 De la pastroj: de la idoj de Jedaja, el
la domo de Jeŝua, naŭcent sepdek tri, 40 de la idoj
de Imer, mil kvindek du, 41 de la idoj de Paŝĥur, mil
ducent kvardek sep, 42 de la idoj de Ĥarim, mil dek
sep. 43 De la Levidoj: de la idoj de Jeŝua, el la domo
de Kadmiel, el la filoj de Hodja, sepdek kvar. 44 De la
kantistoj: de la idoj de Asaf, cent kvardek ok. 45 De la
pordegistoj: la idoj de Ŝalum, la idoj de Ater, la idoj de
Talmon, la idoj de Akub, la idoj de Ĥatita, la idoj de
Ŝobaj, cent tridek ok. 46 De la Netinoj: la idoj de Ciĥa,
la idoj de Ĥasufa, la idoj de Tabaot, 47 la idoj de Keros,
la idoj de Sia, la idoj de Padon, 48 la idoj de Lebana, la
idoj de Ĥagaba, la idoj de Ŝalmaj, 49 la idoj de Ĥanan,
la idoj de Gidel, la idoj de Gaĥar, 50 la idoj de Reaja, la
idoj de Recin, la idoj de Nekoda, 51 la idoj de Gazam,
la idoj de Uza, la idoj de Paseaĥ, 52 la idoj de Besaj, la
idoj de Meunim, la idoj de Nefiŝesim, 53 la idoj de
Bakbuk, la idoj de Ĥakufa, la idoj de Ĥarĥur, 54 la idoj
de Baclit, la idoj de Meĥida, la idoj de Ĥarŝa, 55 la idoj
de Barkos, la idoj de Sisra, la idoj de Tamaĥ, 56 la idoj
de Neciaĥ, la idoj de Ĥatifa. 57 La idoj de la servantoj
de Salomono: la idoj de Sotaj, la idoj de Soferet, la idoj
de Perida, 58 la idoj de Jaala, la idoj de Darkon, la idoj
de Gidel, 59 la idoj de Ŝefatja, la idoj de Ĥatil, la idoj
de Poĥeret-Cebaim, la idoj de Amon. 60 La nombro de
ĉiuj Netinoj kaj de la idoj de la servantoj de Salomono
estis tricent naŭdek du. 61 Kaj jen estas la elirintoj
el Tel-Melaĥ, Tel-Ĥarŝa, Kerub, Adon, kaj Imer, kiuj
ne povis montri sian patrodomon kaj devenon, ĉu
ili devenas de Izrael: 62 la idoj de Delaja, la idoj de
Tobija, la idoj de Nekoda, sescent kvardek du. 63 Kaj
el la pastroj: la idoj de Ĥabaja, la idoj de Hakoc, la
idoj de Barzilaj, kiu prenis al si edzinon el la filinoj de
Barzilaj, la Gileadano, kaj estis nomata per ilia nomo.
64 Ili serĉis siajn dokumentojn genealogiajn, sed ĉi tiuj
ne troviĝis; tial ili estis eligitaj el la listo de la pastroj.
65 Kaj la regionestro diris al ili, ke ili ne manĝu el la
plejsanktaĵo, ĝis aperos pastro kun la signoj de lumo
kaj de justo. 66 La tuta komunumo kune konsistis
el kvardek du mil tricent sesdek homoj, 67 krom
iliaj sklavoj kaj sklavinoj, kies nombro estis sep mil
tricent tridek sep, kaj al tio estis ducent kvardek kvin
kantistoj kaj kantistinoj. 68 Da ĉevaloj ili havis sepcent
tridek ses; da muloj ili havis ducent kvardek kvin; 69
da kameloj ili havis kvarcent tridek kvin; da azenoj ses
mil sepcent dudek. 70 Kelkaj el la ĉefoj de patrodomoj
donis por la laboroj: la regionestro donis por la
trezorejo: mil darkemonojn da oro, kvindek aspergajn
kalikojn, kvincent tridek pastrajn vestojn. 71 El la
ĉefoj de patrodomoj, kelkaj donis en la trezorejon
de la laboroj dudek mil darkemonojn da oro kaj du
mil ducent min'ojn da arĝento. 72 Kaj kion donis la
ceteraj el la popolo, tio estis: dudek mil darkemonoj
da oro kaj du mil min'oj da arĝento kaj sesdek sep
pastraj vestoj. 73 Kaj ekloĝis la pastroj kaj la Levidoj
kaj la pordegistoj kaj la kantistoj kaj la popolanoj kaj

la Netinoj kaj la tuta Izrael en siaj urboj. Kiam venis la
sepa monato, la Izraelidoj estis jam en siaj urboj.

**8** Kaj la tuta popolo, kiel unu homo, kolektiĝis sur
la placo, kiu estas antaŭ la Pordego de la Akvo, kaj
ili diris al Ezra, la skribisto, ke li alportu la libron
de instruo de Moseo, kiun la Eternulo ordonis al
Izrael. 2 Kaj la pastro Ezra alportis la instruon antaŭ
la komunumon, antaŭ la virojn kaj virinojn, antaŭ
ĉiujn, kiuj povis kompreni, en la unua tago de la sepa
monato. 3 Kaj li legis el ĝi sur la placo, kiu estas antaŭ
la Pordego de la Akvo, de la tagiĝo ĝis la tagmezo,
antaŭ la viroj kaj virinoj kaj komprenpovantoj; kaj
la oreloj de la tuta popolo estis turnitaj al la libro
de instruo. 4 Kaj la skribisto Ezra staris sur ligna
ambono, kiun oni faris por tio, kaj apud li staris
Matitja, Ŝema, Anaja, Urija, Ĥilkija, kaj Maaseja,
dekstre de li; kaj maldekstre de li: Pedaja, Miŝael,
Malkija, Ĥaŝum, Ĥaŝbadana, Zeĥarja, kaj Meŝulam.
5 Kaj Ezra malfermis la libron antaŭ la okuloj de la
tuta popolo, ĉar li staris pli alte ol la tuta popolo;
kaj kiam li ĝin malfermis, la tuta popolo stariĝis. 6
Kaj Ezra benis la Eternulon, la grandan Dion; kaj la
tuta popolo respondis: Amen, amen, levante supren
siajn manojn; kaj ili kliniĝis kaj faris adoron antaŭ
la Eternulo vizaĝaltere. 7 Kaj Jeŝua, Bani, Ŝerebja,
Jamin, Akub, Ŝabtaj, Ĥodija, Maaseja, Kelita, Azarja,
Jozabad, Ĥanan, Pelaja, kaj la Levidoj klarigadis al la
popolo la instruon; kaj la popolo staris sur sia loko.
8 Kaj ili legis el la libro, el la instruo de Dio, klare,
kun komentarioj, ke oni komprenu la legataĵon. 9 Kaj
Neĥemja, kiu estis la regionestro, kaj la pastro Ezra,
la skribisto, kaj la Levidoj, kiuj donadis klarigojn al
la popolo, diris al la tuta popolo: Ĉi tiu tago estas
sankta al la Eternulo, via Dio; ne malĝoju kaj ne ploru.
Ĉar la tuta popolo ploris, aŭskultante la vortojn de
la instruo. 10 Kaj li diris al ili: Iru, manĝu grasaĵon
kaj trinku dolĉaĵon, kaj sendu porciojn al tiuj, kiuj
nenion pretigis por si; ĉar ĉi tiu tago estas sankta al
nia Sinjoro; kaj ne malĝoju, ĉar la ĝojo pri la Eternulo
estas via forto. 11 Kaj la Levidoj trankviligadis la tutan
popolon, dirante: Ĉesu, ĉar ĉi tiu tago estas sankta;
ne malĝoju. 12 Kaj la tuta popolo iris, por manĝi kaj
trinki kaj sendi porciojn kaj fari grandan festenon;
ĉar ili komprenis la vortojn, kiujn oni sciigis al ili. 13
En la dua tago kunvenis la ĉefoj de patrodomoj de
la tuta popolo, ankaŭ la pastroj kaj la Levidoj, al la
skribisto Ezra, por ke li plue klarigu al ili la vortojn
de la instruo. 14 Kaj ili trovis, ke en la instruo, kiun
la Eternulo ordonis per Moseo, estas skribite, ke la
Izraelidoj sidu en laŭboj en la festo de la sepa monato,
15 kaj ke ili aŭdigu kaj proklamu en ĉiuj siaj urboj kaj
en Jerusalem, dirante: Iru sur la monton, kaj prenu
branĉojn de olivarbo, branĉojn de oleastraj arboj,
branĉojn de mirto, branĉojn de palmoj, kaj branĉojn
de densfoliaj arboj, por fari laŭbojn, kiel estas skribite.
16 Kaj la popolo eliris kaj prenis, kaj faris al si laŭbojn,
ĉiu sur sia tegmento, aŭ sur sia korto, aŭ sur la kortoj
de la domo de Dio, aŭ sur la placo de la Pordego de la
Akvo, aŭ sur la placo de la Pordego de Efraim. 17 Kaj
la tuta komunumo de tiuj, kiuj revenis el la kaptiteco,
faris laŭbojn kaj loĝis en la laŭboj; ĉar de la tempo de
Josuo, filo de Nun, ĝis tiu tago la Izraelidoj tion ne
faris. Kaj estis tre granda ĝojo. 18 Kaj oni legis el la
libro de instruo de Dio ĉiutage, de la unua tago ĝis la
lasta tago. Kaj oni festis dum sep tagoj, kaj en la oka
tago oni faris ferman feston, laŭ la preskribo.

**9** En la dudek-kvara tago de tiu monato kunvenis
la Izraelidoj, fastante, en sakaĵoj kaj kun tero sur
la kapoj. 2 Kaj la idaro de Izrael apartigis sin de ĉiuj
fremduloj, kaj stariĝis, kaj faris konfeson pri siaj pekoj
kaj pri la pekoj de siaj patroj. 3 Kaj ili leviĝis sur la
loko, kie ili staris, kaj oni legis el la libro de instruo de
la Eternulo, ilia Dio, dum kvarono de tago, kaj dum
alia kvarono oni faris konfeson kaj adorkliniĝon antaŭ
la Eternulo, ilia Dio. 4 Kaj sur la tribuno por la Levidoj
stariĝis Jeŝua, Bani, Kadmiel, Ŝebanja, Buni, Ŝerebja,
Bani, kaj Kenani, kaj ekvokis per laŭta voĉo al la
Eternulo, ilia Dio. 5 Kaj diris la Levidoj Jeŝua, Kadmiel,
Bani, Ĥaŝabneja, Ŝerebja, Hodija, Ŝebanja, kaj Petaĥja:
Leviĝu, benu la Eternulon, vian Dion, de eterne ĝis
eterne. Kaj oni benu Vian nomon, la majestan kaj
plej altan super ĉia beno kaj laŭdo. 6 Vi, ho Eternulo,
estas sola; Vi faris la ĉielon, la ĉielon de ĉieloj, kaj
ĝian tutan armeon, la teron, kaj ĉion, kio estas sur ĝi,
la marojn, kaj ĉion, kio estas en ili; kaj Vi donas vivon
al ĉio, kaj la armeo de la ĉielo adorkliniĝas antaŭ Vi. 7
Vi estas la Eternulo, la Dio, kiu elektis Abramon kaj
elirigis lin el Ur la Ĥaldea kaj donis al li la nomon
Abraham, 8 kaj trovis lian koron fidela antaŭ Vi, kaj
faris kun li interligon, por transdoni la landon de la
Kanaanidoj, la Ĥetidoj, la Amoridoj, la Perizidoj, la
Jebusidoj, kaj la Girgaŝidoj, transdoni ĝin al lia idaro;

kaj Vi plenumis Viajn vortojn, ĉar Vi estas justa. 9 Vi
vidis la mizeron de niaj patroj en Egiptujo, kaj Vi aŭdis
ilian kriadon ĉe la Ruĝa Maro; 10 kaj Vi faris signojn
kaj miraklojn super Faraono, super ĉiuj liaj servantoj,
kaj super la tuta popolo de lia lando, ĉar Vi sciis, ke ili
agis fiere kontraŭ ili; kaj Vi faris al Vi nomon, kia ĝi
estas ĝis nun. 11 Kaj Vi disfendis antaŭ ili la maron,
kaj ili trairis meze de la maro sur seka tero; kaj iliajn
persekutantojn Vi ĵetis en la profundon, kiel ŝtonon
en potencan akvon. 12 Per nuba kolono Vi kondukis
ilin tage, kaj per fajra kolono nokte, por prilumi al ili
la vojon, kiun ili devis iri. 13 Kaj sur la monton Sinaj Vi
malsupreniris, kaj Vi parolis al ili el la ĉielo, kaj donis
al ili instrukciojn ĝustajn, instruojn verajn, leĝojn
kaj ordonojn bonajn. 14 Kaj Vian sanktan sabaton Vi
konigis al ili, kaj ordonojn, leĝojn, kaj instruon Vi
ordonis al ili, per Via servanto Moseo. 15 Kaj panon
en la ĉielo Vi donis al ili kontraŭ ilia malsato, kaj
akvon el roko Vi elirigis por ili kontraŭ ilia soifo;
kaj Vi diris al ili, ke ili iru ekposedi la landon, kiun
per levo de la mano Vi promesis doni al ili. 16 Sed
ili kaj niaj patroj fariĝis fieraj kaj malmolnukaj kaj
ne obeis Viajn ordonojn; 17 ili ne volis obei, kaj ne
memoris Viajn mirindaĵojn, kiujn Vi faris sur ili;
ili malmoligis sian nukon kaj starigis al si estron,
por reveni ribele al sia sklaveco. Sed Vi estas Dio
pardonema, indulgema kaj kompatema, pacienca kaj
favorkora, kaj Vi ne forlasis ilin. 18 Kvankam ili faris
al si fanditan bovidon, kaj diris: Jen estas via dio,
kiu elkondukis vin el Egiptujo, kaj kvankam ili faris
grandajn blasfemojn, 19 Vi tamen en Via granda
favorkoreco ne forlasis ilin en la dezerto, la nuba
kolono ne foriĝis de ili tage, por konduki ilin sur la
vojo, kaj la fajra kolono nokte, por prilumi al ili la
vojon, kiun ili devis iri; 20 kaj Vian bonan spiriton Vi
donis al ili, por instrui ilin, kaj Vian manaon Vi ne
rifuzis al ilia buŝo, kaj akvon Vi donis al ili kontraŭ
ilia soifo. 21 Kaj dum kvardek jaroj Vi nutris ilin en la
dezerto; nenio mankis al ili; iliaj vestoj ne sentaŭgiĝis,
kaj iliaj piedoj ne ŝvelis. 22 Kaj Vi donis al ili regnojn
kaj popolojn, kaj dividis ilin laŭparte; kaj ili ekposedis
la landon de Siĥon, la landon de la reĝo de Ĥeŝbon,
kaj la landon de Og, reĝo de Baŝan. 23 Kaj iliajn filojn
Vi multigis kiel la steloj de la ĉielo, kaj Vi venigis ilin
en la landon, pri kiu Vi diris al iliaj patroj, ke ili venos
kaj ekposedos ĝin. 24 Kaj la filoj venis kaj ekposedis la
landon; kaj Vi humiligis antaŭ ili la loĝantojn de la
lando, la Kanaanidojn, kaj transdonis ilin en iliajn
manojn, ankaŭ iliajn reĝojn kaj la popolojn de la
lando, por ke ili agu kun ĉi tiuj laŭ sia bontrovo.
25 Kaj ili venkoprenis urbojn fortikigitajn kaj teron
grasan, kaj ili ekposedis domojn plenajn de ĉio bona,
putojn elhakitajn en ŝtonoj, vinberĝardenojn kaj
olivĝardenojn, kaj multajn manĝaĵdonajn arbojn. Kaj
ili manĝis, satiĝis, grasiĝis, kaj ĝuis, dank' al Via
granda boneco. 26 Kaj ili fariĝis malobeemaj kaj defalis
de Vi kaj ĵetis Vian instruon malantaŭ sian dorson;
Viajn profetojn, kiuj admonis ilin returni sin al Vi, ili
mortigis; kaj ili faris grandajn blasfemojn. 27 Tiam Vi
transdonis ilin en la manojn de iliaj malamikoj, kaj
ĉi tiuj premis ilin. Sed en la tempo de sia mizero ili
vokis al Vi, kaj Vi el la ĉielo aŭdis, kaj pro Via granda
favorkoreco Vi donis al ili savantojn, kiuj savis ilin el
la manoj de iliaj malamikoj. 28 Tamen, kiam ili ricevis
trankvilecon, ili denove faradis malbonon antaŭ Vi.
Kaj Vi forlasis ilin en la manoj de iliaj malamikoj, kiuj
regis super ili. Sed, kiam ili returnis sin kaj vokis al
Vi, Vi aŭdis el la ĉielo, kaj Vi savis ilin multfoje pro
Via granda kompatemeco. 29 Vi admonis ilin, ke ili
returnu sin al Via instruo; sed ili estis malhumilaj
kaj ne obeis Viajn ordonojn, ili pekis kontraŭ Viaj
preskriboj, per kies plenumado la homo vivas, ili
deturnis sian ŝultron, malmoligis sian nukon, kaj ne
volis aŭskulti. 30 Vi atendis por ili dum multe da jaroj,
Vi admonadis ilin kun Via spirito per Viaj profetoj;
sed ili ne atentis; tial Vi transdonis ilin en la manojn
de la popoloj alilandaj. 31 Tamen pro Via granda
kompatemeco Vi ne ekstermis ilin tute, kaj ne forlasis
ilin, ĉar Vi estas Dio indulgema kaj kompatema. 32 Kaj
nun, ho nia Dio, Dio granda, potenca, kaj timinda,
kiu konservas la interligon kaj la favorkorecon, ne
rigardu kiel tro malgrandan la tutan suferon, kiu
trafis nin, niajn reĝojn, niajn princojn, niajn pastrojn,
niajn profetojn, niajn patrojn, kaj Vian tutan popolon,
de la tempo de la reĝoj de Asirio ĝis la nuna tago.
33 Vi estas justa en ĉio, kio trafis nin; ĉar Vi agis
laŭ la vero, kaj ni agis malpie. 34 Kaj niaj reĝoj, niaj
princoj, niaj pastroj, kaj niaj patroj ne plenumis Vian
instruon, kaj ne atentis Viajn ordonojn kaj admonojn,
per kiuj Vi ilin admonis. 35 En la tempo de sia regno,
kaj ĉe Via granda bono, kiun Vi donis al ili, sur la
tero vasta kaj grasa, kiun Vi donis al ili, ili ne servis
al Vi kaj ne deturnis sin de siaj malbonaj agoj. 36
Jen ni hodiaŭ estas sklavoj, kaj sur la tero, kiun Vi

donis al niaj patroj, por ke ni manĝu ĝiajn fruktojn
kaj ĝian bonaĵon, jen ni estas sklavoj sur ĝi. 37 Kaj ĝiaj
produktaĵoj abunde iras al la reĝoj, kiujn Vi starigis
super ni pro niaj pekoj; ili regas super niaj korpoj kaj
super niaj brutoj laŭ sia plaĉo, kaj en granda mizero
ni estas. 38 En ĉio ĉi tio ni faras firman interligon,
kaj ni skribas, kaj tion sigelas niaj eminentuloj, niaj
Levidoj, niaj pastroj.

**10** La sigelintoj estas: Neĥemja, la regionestro, filo
de Ĥaĥalja, kaj Cidkija, 2 Seraja, Azarja, Jeremia,
3 Paŝĥur, Amarja, Malkija, 4 Ĥatuŝ, Ŝebanja, Maluĥ, 5
Ĥarim, Meremot, Obadja, 6 Daniel, Ginton, Baruĥ, 7
Meŝulam, Abija, Mijamin, 8 Maazja, Bilgaj, Ŝemaja.
Tio estas la pastroj. 9 La Levidoj: Jeŝua, filo de Azanja,
Binuj, el la filoj de Ĥenadad, Kadmiel; 10 kaj iliaj fratoj:
Ŝebanja, Hodija, Kelita, Pelaja, Ĥanan, 11 Miĥa, Reĥob,
Ĥaŝabja, 12 Zakur, Ŝerebja, Ŝebanja, 13 Hodija, Bani,
Beninu. 14 La ĉefoj de la popolo: Paroŝ, Paĥat-Moab,
Elam, Zatu, Bani, 15 Buni, Azgad, Bebaj, 16 Adonija,
Bigvaj, Adin, 17 Ater, Ĥizkija, Azur, 18 Hodija, Ĥaŝum,
Becaj, 19 Ĥarif, Anatot, Nebaj, 20 Magpiaŝ, Meŝulam,
Ĥezir, 21 Meŝezabel, Cadok, Jadua, 22 Pelatja, Ĥanan,
Anaja, 23 Hoŝea, Ĥananja, Ĥaŝub, 24 Haloĥeŝ, Pilĥa,
Ŝobek, 25 Reĥum, Ĥaŝabna, Maaseja, 26 Aĥija, Ĥanan,
Anan, 27 Maluĥ, Ĥarim, Baana. 28 Kaj la cetera popolo,
la pastroj, Levidoj, pordegistoj, kantistoj, Netinoj, kaj
ĉiuj, kiuj apartiĝis de la aligentaj popoloj al la instruo
de Dio, iliaj edzinoj, filoj, kaj filinoj, ĉiuj, kiuj povis
kompreni, 29 aliĝis al siaj fratoj, al la eminentuloj, kaj
ligis sin per ĵura promeso, ke ili sekvos la instruon de
Dio, donitan per Moseo, servanto de Dio, kaj ke ili
konservos kaj plenumos ĉiujn ordonojn de la Eternulo,
nia Sinjoro, Liajn preskribojn kaj leĝojn; 30 ke ni ne
donos niajn filinojn al la popoloj de la lando, kaj
iliajn filinojn ni ne prenos por niaj filoj; 31 ke kiam
la popoloj de la lando venigos la komercaĵojn aŭ
ĉiaspecan grenon en sabato, por vendi, ni ne prenos
de ili en sabato aŭ en alia sankta tago; ke en ĉiu sepa
jaro ni forigos ĉiujn ŝuldojn. 32 Kaj ni starigis al ni
kiel leĝon, ke ni donados de ni po triono de siklo
ĉiujare por la servado en la domo de nia Dio: 33 por la
panoj de propono, por la ĉiutaga farunofero, por la
ĉiutaga brulofero, por la sabatoj, monatkomencoj,
festoj, por la sanktaĵoj, por pekoferoj, por pekliberigi
Izraelon, kaj por ĉiuj laboroj en la domo de nia Dio.
34 Kaj ni lotis inter la pastroj, Levidoj, kaj popolo
pri la ofera liverado de ligno en la domo de nia
Dio, laŭ niaj patrodomoj, ĉiujare en difinitaj tempoj,
por bruligi sur la altaro de la Eternulo, nia Dio, kiel
estas skribite en la instruo. 35 Kaj ni akceptis kiel
devon, ke ni alportados la unuaaĵojn de nia tero kaj
la unuaaĵojn de ĉiuj fruktoj de ĉiu arbo ĉiujare en
la domon de la Eternulo; 36 ankaŭ la unuenaskitojn
el niaj filoj kaj el niaj brutoj, kiel estas skribite en
la instruo, kaj la unuenaskitojn de niaj bovoj kaj de
niaj ŝafoj ni alportados en la domon de nia Dio, al la
pastroj, kiuj servas en la domo de nia Dio. 37 Kaj la
unuaaĵon de nia pasto, niajn oferdonojn, la fruktojn
de ĉiuj arboj, moston, kaj oleon ni alportados al la
pastroj en la ĉambrojn de la domo de nia Dio; kaj
la dekonaĵon de nia tero ni donos al la Levidoj, por
ke ili, la Levidoj, havu dekonaĵon en ĉiuj urboj, kie
ni prilaboras la teron. 38 Kaj la pastro, la Aaronido,
estos kun la Levidoj, kiam ili prenos la dekonaĵon;
kaj la Levidoj venigos dekonaĵon el la dekonaĵo en la
domon de nia Dio, en la ĉambrojn de la provizejo. 39
Ĉar en tiujn ĉambrojn la Izraelidoj kaj la Levidoj devas
liveri la oferdonon el la greno, mosto, kaj oleo. Tie
troviĝas la vazoj de la sanktejo, la servantaj pastroj,
la pordegistoj, kaj la kantistoj. Kaj ni ne forlasos la
domon de nia Dio.

**11** La estroj de la popolo loĝis en Jerusalem. La
cetera popolo faris lotadon, por ke unu parto el
dek loĝu en Jerusalem, la sankta urbo, kaj la ceteraj
naŭ partoj en la urboj. 2 Kaj la popolo benis ĉiujn
homojn, kiuj memvole konsentis loĝi en Jerusalem.
3 Jen estas la ĉefoj de la provinco, kiuj loĝis en
Jerusalem; en la urboj de Judujo loĝis ĉiu en sia
posedaĵo, laŭ siaj urboj, la Izraelidoj, pastroj, Levidoj,
Netinoj, kaj idoj de la servantoj de Salomono. 4 En
Jerusalem loĝis el la idoj de Jehuda kaj el la idoj de
Benjamen: el la idoj de Jehuda: Ataja, filo de Uzija,
filo de Zeĥarja, filo de Amarja, filo de Ŝefatja, filo de
Mahalalel, el la filoj de Perec; 5 kaj Maaseja, filo de
Baruĥ, filo de Kol-Ĥoze, filo de Ĥazaja, filo de Adaja,
filo de Jojarib, filo de Zeĥarja, filo de la Ŝiloano. 6 La
nombro de ĉiuj idoj de Perec, kiuj loĝis en Jerusalem,
estis kvarcent sesdek ok, homoj batalkapablaj. 7 Kaj
jen estas la idoj de Benjamen: Salu, filo de Meŝulam,
filo de Joed, filo de Pedaja, filo de Kolaja, filo de
Maaseja, filo de Itiel, filo de Jeŝaja; 8 post li Gabaj,
Salaj, naŭcent dudek ok. 9 Kaj Joel, filo de Ziĥri,

estis ilia estro; kaj Jehuda, filo de Hasenua, estis
dua urbestro. 10 El la pastroj: Jedaja, filo de Jojarib,
Jaĥin, 11 Seraja, filo de Ĥilkija, filo de Meŝulam, filo
de Cadok, filo de Merajot, filo de Aĥitub, estro en
la domo de Dio. 12 Kaj iliaj fratoj, kiuj plenumadis
laboron en la domo, estis en la nombro de okcent
dudek du; kaj Adaja, filo de Jeroĥam, filo de Pelalja,
filo de Amci, filo de Zeĥarja, filo de Paŝĥur, filo de
Malkija; 13 kaj liaj fratoj, ĉefoj de patrodomoj, ducent
kvardek du; kaj Amaŝsaj, filo de Azarel, filo de Aĥzaj,
filo de Meŝilemot, filo de Imer; 14 kaj iliaj fratoj,
kuraĝaj viroj, cent dudek ok. Ilia estro estis Zabdiel,
filo de Hagedolim. 15 Kaj el la Levidoj: Ŝemaja, filo
de Ĥaŝub, filo de Azrikam, filo de Ĥaŝabja, filo de
Buni; 16 kaj Ŝabtaj kaj Jozabad super la eksteraj aferoj
de la domo de Dio, el la ĉefoj de la Levidoj; 17 kaj
Matanja, filo de Miĥa, filo de Zabdi, filo de Asaf, ĉefa
komencisto de laŭdkantado ĉe la preĝoj, kaj Bakbukja,
la dua inter siaj fratoj, kaj Abda, filo de Ŝamua, filo de
Galal, filo de Jedutun. 18 La nombro de ĉiuj Levidoj
en la sankta urbo estis ducent okdek kvar. 19 Kaj la
pordegistoj: Akub, Talmon, kaj iliaj fratoj, gardistoj ĉe
la pordegoj, cent sepdek du. 20 La ceteraj Izraelidoj,
pastroj, kaj Levidoj loĝis en ĉiuj urboj de Judujo, ĉiu
en sia posedaĵo. 21 Kaj la Netinoj loĝis en Ofel; Ciĥa kaj
Giŝpa estis super la Netinoj. 22 Estro de la Levidoj en
Jerusalem estis Uzi, filo de Bani, filo de Ĥaŝabja, filo
de Matanja, filo de Miĥa, el la idoj de Asaf, kantistoj
ĉe la servado en la domo de Dio. 23 Ĉar pri ili estis
ordono de la reĝo, kaj por la kantistoj estis difinita
ĉiutaga salajro. 24 Kaj Petaĥja, filo de Meŝezabel, el la
idoj de Zeraĥ, filo de Jehuda, estis komisiita de la reĝo
por ĉiuj aferoj, koncernantaj la popolon. 25 Kaj en la
vilaĝoj, sur siaj kampoj multaj el la idoj de Jehuda
loĝis en Kirjat-Arba kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, en Dibon kaj
ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, en Kabceel kaj ĝiaj vilaĝoj, 26 en Jeŝua,
en Molada, en Bet-Pelet, 27 en Ĥacar-Ŝual, en Beer-
Ŝeba kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, 28 en Ciklag, en Meĥona kaj
ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, 29 en En-Rimon, en Corea, en Jarmut,
30 en Zanoaĥ, en Adulam, kaj iliaj vilaĝoj, en Laĥiŝ
kaj sur ĝiaj kampoj, en Azeka kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Ili
starigis siajn tendojn de Beer-Ŝeba ĝis la valo Hinom.
31 Kaj la idoj de Benjamen loĝis komencante de Geba,
en Miĥmaŝ, en Aja, en Bet-El kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, 32 en
Anatot, en Nob, en Ananja, 33 en Ĥacor, en Rama, en
Gitaim, 34 en Ĥadid, en Ceboim, en Nebalat, 35 en Lod,
en Ono, en la Valo de Ĉarpentistoj. 36 Kaj el la Levidoj
parto el Judujo loĝis en la regiono de Benjamen.

12 Jen estas la pastroj kaj Levidoj, kiuj venis kun
Zerubabel, filo de Ŝealtiel, kaj kun Jeŝua: Ŝeraja,
Jeremia, Ezra, 2 Amarja, Maluĥ, Ĥatuŝ, 3 Ŝeĥanja,
Reĥum, Meremot, 4 Ido, Ginton, Abija, 5 Mijamin,
Maadja, Bilga, 6 Ŝemaja, Jojarib, Jedaja, 7 Salu, Amok,
Ĥilkija, Jedaja. Tio estas la ĉefoj de la pastroj kaj
iliaj fratoj en la tempo de Jeŝua. 8 Kaj la Levidoj:
Jeŝua, Binuj, Kadmiel, Ŝerebja, Jehuda, Matanja, super
la laŭdkantoj, li kaj liaj fratoj; 9 kaj Bakbukja kaj
Uni, iliaj fratoj, deĵoris kun ili. 10 Jeŝua naskigis
Jojakimon, Jojakim naskigis Eljaŝibon, Eljaŝib naskigis
Jojadan, 11 Jojada naskigis Jonatanon, Jonatan naskigis
Jaduan. 12 En la tempo de Jojakim estis pastroj ĉefoj
de patrodomoj: de la domo de Seraja: Meraja; de la
domo de Jeremia: Ĥananja; 13 de la domo de Ezra:
Meŝulam; de la domo de Amarja: Jehoĥanan; 14 de
la domo de Meliĥu: Jonatan; de la domo de Ŝebanja:
Jozef; 15 de la domo de Ĥarim: Adna; de la domo de
Merajot: Ĥelkaj; 16 de la domo de Ido: Zeĥarja; de la
domo de Ginton: Meŝulam; 17 de la domo de Abija:
Ziĥri; de la domo de Minjamin, de la domo de Moadja:
Piltaj; 18 de la domo de Bilga: Ŝamua; de la domo de
Ŝemaja: Jehonatan; 19 de la domo de Jojarib: Matnaj;
de la domo de Jedaja: Uzi; 20 de la domo de Salaj:
Kalaj; de la domo de Amok: Eber; 21 de la domo de
Ĥilkija: Ĥaŝabja; de la domo de Jedaja: Netanel. 22
El la Levidoj estis enskribitaj la ĉefoj de patrodomoj
en la tempo de Eljaŝib, Jojada, Joĥanan, kaj Jadua; la
pastroj dum la reĝado de Dario la Persa. 23 La Levidoj,
ĉefoj de patrodomoj, estis enskribitaj en la libron de
kroniko ĝis la tempo de Joĥanan, filo de Eljaŝib. 24
La ĉefoj de la Levidoj: Ĥaŝabja, Ŝerebja, Jeŝua, filo de
Kadmiel, kaj iliaj fratoj apud ili estis destinitaj por la
laŭdkantoj, laŭ la aranĝo de David, la homo de Dio, laŭ
deĵorpartoj. 25 Matanja, Bakbukja, Obadja, Meŝulam,
Talmon, kaj Akub estis pordegistoj, kaj deĵoris en la
provizejoj ĉe la pordegoj. 26 Ili estis en la tempo de
Jojakim, filo de Jeŝua, filo de Jocadak, kaj en la tempo
de Neĥemja, la regionestro, kaj de Ezra, la pastro-
skribisto. 27 Ĉe la inaŭguro de la murego de Jerusalem
oni serĉis la Levidojn el ĉiuj iliaj lokoj, por venigi ilin
en Jerusalemon, por fari inaŭguron kaj ĝojan feston,
kun glorhimnoj kaj kantoj, kun cimbaloj, psalteroj,
kaj harpoj. 28 Kaj kunvenis la idoj de kantistoj el

la regiono ĉirkaŭ Jerusalem kaj el la vilaĝoj de la
Netofaanoj, 29 el Bet-Gilgal, de la kampoj de Geba kaj
Azmavet; ĉar la kantistoj konstruis al si vilaĝojn en la
ĉirkaŭaĵo de Jerusalem. 30 Kaj purigis sin la pastroj
kaj la Levidoj, kaj ili purigis la popolon, la pordegojn,
kaj la muregon. 31 Tiam mi suprenirigis la estrojn de
Judujo sur la muregon, kaj mi starigis du grandajn
ĥorojn kaj procesiojn. Unu sur la dekstra flanko de
la murego, ĉe la Pordego de Sterko. 32 Kaj post ili
iris Hoŝaja, kaj duono de la estroj de Judujo, 33 kaj
Azarja, Ezra, Meŝulam, 34 Jehuda, Benjamen, Ŝemaja,
kaj Jeremia. 35 El la pastridoj kun trumpetoj: Zeĥarja,
filo de Jonatan, filo de Ŝemaja, filo de Matanja, filo de
Miĥaja, filo de Zakur, filo de Asaf; 36 kaj liaj fratoj:
Ŝemaja, Azarel, Milalaj, Gilalaj, Maaj, Netanel, Jehuda,
Ĥanani, kun muzikaj instrumentoj de David, la homo
de Dio; kaj antaŭ ili estis Ezra, la skribisto. 37 Apud la
Pordego de la Fonto, kontraŭ ĝi, ili iris sur la ŝtupoj
de la urbo de David supren sur la muregon al la domo
de David, kaj ĝis la Pordego de la Akvo oriente. 38 La
dua ĥoro iris kontraŭe de ili, kaj post ĝi iris mi kaj
duono de la popolo, supre sur la murego, de la Turo
de la Fornoj ĝis la Larĝa Murego, 39 al la Pordego de
Efraim, al la Malnova Pordego, al la Pordego de Fiŝoj,
al la turo de Ĥananel, al la turo Mea, ĝis la Pordego de
Ŝafoj; kaj ili haltis ĉe la Pordego de la Malliberejo.
40 Kaj ambaŭ ĥoroj haltis ĉe la domo de Dio, ankaŭ
mi kaj duono de la estroj kun mi, 41 kaj la pastroj
Eljakim, Maaseja, Minjamin, Miĥaja, Eljoenaj, Zeĥarja,
Ĥananja, kun trumpetoj, 42 kaj Maaseja, Ŝemaja,
Eleazar, Uzi, Jehoĥanan, Malkija, Elam, kaj Ezer. Kaj
laŭte kantis la kantistoj; ilia ĉefo estis Jizraĥja. 43 Kaj
oni alportis en tiu tago grandajn oferojn, kaj oni estis
gajaj; ĉar Dio ĝojigis ilin per granda ĝojo; eĉ la virinoj
kaj la infanoj ĝojis, kaj la gajeco de Jerusalem estis
aŭdata malproksime. 44 Kaj en tiu tago estis starigitaj
homoj por la ĉambroj de provizejo, por la oferdonoj,
la unuaaĵoj, la dekonaĵoj, por kolekti en tiuj ĉambroj
el la kampoj de la urboj la preskribitajn partojn
por la pastroj kaj la Levidoj; ĉar la Judoj ĝojis pri la
pastroj kaj Levidoj, kiuj staris. 45 Kaj ili observadis la
preskribon de sia Dio kaj la preskribon pri la pureco.
Kaj la kantistoj kaj pordegistoj staris konforme al la
preskribo de David kaj de lia filo Salomono. 46 Ĉar
ankaŭ antaŭe, en la tempo de David kaj Asaf, estis
ĉefoj de kantistoj, kaj glorkantoj kaj dankokantoj al
Dio. 47 Ĉiuj Izraelidoj en la tempo de Zerubabel kaj en
la tempo de Neĥemja donadis partojn ĉiutagajn al la
kantistoj kaj pordegistoj; kaj ili konsekradis partojn
por la Levidoj, kaj la Levidoj konsekradis partojn por
la idoj de Aaron.

13 En tiu tago oni legis el la libro de Moseo antaŭ la
oreloj de la popolo; kaj troviĝis, ke estas skribite
en ĝi, ke Amonido kaj Moabido neniam devas eniri en
la komunumon de Dio; 2 ĉar ili ne venis renkonte al
la Izraelidoj kun pano kaj akvo, kaj dungis kontraŭ
ili Bileamon, por malbeni ilin; sed nia Dio ŝanĝis la
malbenon en benon. 3 Kiam ili aŭdis tiun leĝon, ili
apartigis de Izrael ĉiun aligentulon. 4 Antaŭ ĉi tio la
pastro Eljaŝib, administranto de la ĉambroj de la domo
de nia Dio, parenco de Tobija, 5 aranĝis por li grandan
ĉambron, en kiu oni antaŭe deponadis la farunoferon,
olibanon, vazojn, dekonaĵon el la greno, mosto, kaj
oleo, kiuj estis destinitaj por la Levidoj, kantistoj, kaj
pordegistoj, kaj la oferdonojn por la pastroj. 6 Dum
ĉio ĉi tio mi ne estis en Jerusalem, ĉar en la tridek-
dua jaro de Artaĥŝast, reĝo de Babel, mi iris al la
reĝo, kaj nur post kelka tempo mi forpetis min de la
reĝo. 7 Kiam mi venis en Jerusalemon, mi eksciis pri
la malbono, kiun Eljaŝib faris pro Tobija, aranĝante
por li ĉambron en la kortoj de la domo de Dio. 8 Tio
min forte ĉagrenis, kaj mi elĵetis ĉiujn domobjektojn
de Tobija for el la ĉambro. 9 Kaj mi diris, ke oni
purigu la ĉambrojn; kaj mi revenigis tien la vazojn
de la domo de Dio, la farunoferon kaj la olibanon. 10
Mi ankaŭ eksciis, ke la partoj de la Levidoj ne estis
donataj al ili, ke la Levidoj kaj kantistoj, kiuj devis fari
la servadon, forkuris ĉiu al sia kampo. 11 Tiam mi
faris pro tio severan riproĉon al la estroj, kaj diris:
Kial la domo de Dio estas forlasita? Kaj mi kunvenigis
ilin kaj starigis ilin sur iliaj lokoj. 12 Kaj ĉiuj Judoj
alportadis dekonaĵon el la greno, el la mosto, kaj el
la oleo por la provizejoj. 13 Kaj mi starigis super la
provizejoj la pastron Ŝelemja, la skribiston Cadok, el
la Levidoj Pedajan, kaj al ili Ĥananon, filon de Zakur,
filo de Matanja; ĉar ili estis opiniataj fidindaj. Kaj ili
havis la devon distribui la partojn al siaj fratoj. 14
Memoru tion pri mi, ho mia Dio, kaj ne forviŝu miajn
bonajn agojn, kiujn mi faris koncerne la domon de
mia Dio kaj la servadon al Li. 15 En tiu tempo mi vidis
en Judujo, ke oni tretas vinpremilojn en sabato kaj
portas garbojn kaj ŝarĝas sur azenoj, ankaŭ vinon,
vinberojn, figojn, kaj ĉiaspecan ŝarĝon, kaj veturigas

tion en Jerusalemon en tago sabata. Kaj mi faris al
ili riproĉon en la tago, kiam ili vendis manĝaĵon. 16
Ankaŭ Tiranoj loĝis tie, kaj ili alveturigadis fiŝojn
kaj ĉiaspecajn komercaĵojn, kaj vendadis en sabato
al la loĝantoj de Judujo kaj de Jerusalem. 17 Kaj mi
faris mallaŭdon al la eminentuloj de la Judoj, kaj diris
al ili: Kial vi faras tian malbonon kaj malsanktigas
la tagon sabatan? 18 Tiel agis ja viaj patroj, kaj pro
tio nia Dio venigis sur nin kaj sur ĉi tiun urbon ĉi
tiun tutan malfeliĉon! Kaj vi pligrandigas la koleron
kontraŭ Izrael, malsanktigante la sabaton! 19 Kiam
ĉe la pordegoj de Jerusalem fariĝis krepusko, antaŭ
sabato, mi ordonis ŝlosi la pordojn kaj ne malfermi
ilin ĝis post sabato. Kaj kelkajn el miaj servantoj mi
starigis ĉe la pordegoj, por ke oni ne enportu ŝarĝon
en la tago sabata. 20 Kaj la komercistoj kaj vendistoj
de ĉiaspeca vendeblaĵo noktis ekstere de Jerusalem
unu fojon kaj duan fojon. 21 Kaj mi faris al ili riproĉon,
kaj diris al ili: Kial vi noktas apud la murego? se vi
faros tion duan fojon, mi metos la manon sur vin.
De tiu tempo ili ne venadis en sabato. 22 Kaj mi
diris al la Levidoj, ke ili sin purigu, kaj venu stari
garde ĉe la pordegoj, por ke oni tenu sankte la tagon
sabatan. Ankaŭ ĉi tion memoru pri mi, ho mia Dio, kaj
indulgu min laŭ Via granda favorkoreco. 23 Ankaŭ en
tiu tempo mi vidis Judojn, kiuj prenis al si edzinojn
Aŝdodaninojn, Amonidinojn, kaj Moabidinojn; 24 kaj
iliaj infanoj duone parolis Aŝdode, kaj ne povosciis
paroli Jude, sed nur la lingvon de tiu aŭ alia popolo.
25 Mi faris al ili severan riproĉon kaj malbenis ilin, kaj
batis kelkajn virojn el ili kaj ŝiris al ili la harojn, kaj
devigis ilin ĵuri per Dio: Vi ne donos viajn filinojn al
iliaj filoj kaj ne prenos iliajn filinojn por viaj filoj aŭ
por vi mem. 26 Per tio pekis ja Salomono, reĝo de
Izrael; inter la multaj nacioj ne estis reĝo simila al
li, kaj li estis amata de sia Dio, kaj Dio faris lin reĝo
super la tuta Izrael; tamen eĉ lin pekigis la aligentaj
edzinoj. 27 Kaj ĉu pri vi oni povas aŭdi, ke vi faras ĉi
tiun tutan grandan malbonon, pekante kontraŭ nia
Dio kaj prenante aligentajn edzinojn? 28 El la filoj
de Jojada, filo de la ĉefpastro Eljaŝib, unu estis bofilo
de la Ĥoronano Sanbalat. Mi forpelis lin de mi. 29
Memoru pri ili, ho mia Dio, ke ili makulis la pastrecon
kaj la interligon pastran kaj Levidan. 30 Tiamaniere
mi purigis ilin de ĉio aligenta, kaj mi restarigis la
servoregulojn de la pastroj kaj Levidoj, de ĉiu en lia
ofico, 31 kaj por la oferliverado de ligno en difinitaj
tempoj, kaj por la unuaaĵoj. Memoru min, ho mia Dio,
al bono.

# Ester

**1** Tio estis en la tempo de Aĥaŝveroŝ, de tiu Aĥaŝveroŝ,
kiu reĝis de Hindujo ĝis Etiopujo, super cent dudek
sep landoj. 2 En tiu tempo, kiam la reĝo Aĥaŝveroŝ
sidis sur sia reĝa trono en la kastelurbo Ŝuŝan, 3 en
la tria jaro de lia reĝado, li faris festenon por ĉiuj
siaj princoj kaj siaj servantoj, por la potenculoj de
Persujo kaj Medujo, por la landestroj kaj regionestroj,
kiuj estis ĉe li, 4 montrante la grandan riĉecon de
sia regno kaj la majestan belecon de sia grandeco,
dum multe da tagoj, dum cent okdek tagoj. 5 Kiam
finiĝis tiuj tagoj, la reĝo faris por la tuta popolo,
kiu troviĝis en la kastelurbo Ŝuŝan, de la grandaj
ĝis la malgrandaj, festenon septagan sur la ĝardena
korto de la reĝa palaco. 6 Blankaj, ruĝaj, kaj bluaj
ŝtofoj, fiksitaj per bisinaj kaj purpuraj ŝnuroj, pendis
sur arĝentaj ringoj kaj marmoraj kolonoj. Oraj kaj
arĝentaj benkoj staris sur podio el verda, blanka,
flava, kaj nigra marmoro. 7 La trinkaĵon oni donadis
en oraj vazoj kaj en vazoj ne similaj unuj al la aliaj;
kaj da reĝa vino estis multe, kiel decis al la reĝo. 8 La
trinkado estis en ordo, neniu devigis; ĉar tiel la reĝo
ordonis al ĉiuj administrantoj de sia domo, ke oni
agu laŭ la volo de ĉiu. 9 Ankaŭ la reĝino Vaŝti faris
festenon por la virinoj de la reĝa domo de la reĝo
Aĥaŝveroŝ. 10 En la sepa tago, kiam la koro de la reĝo
gajiĝis de vino, li diris al Mehuman, Bizta, Ĥarbona,
Bigta, Abagta, Zetar, kaj Karkas, la sep eŭnukoj, kiuj
servadis antaŭ la reĝo Aĥaŝveroŝ, 11 ke ili alkonduku
la reĝinon Vaŝti al la reĝo en la reĝina krono, por
montri al la popoloj kaj al la princoj ŝian belecon; ĉar
ŝi estis bela. 12 Sed la reĝino Vaŝti ne volis veni laŭ
la ordono, kiun la reĝo donis per la eŭnukoj. Tiam
la reĝo forte ekkoleris, kaj lia furiozo brulis en li.
13 Kaj la reĝo diris al la saĝuloj kompetentaj pri la
cirkonstancoj (ĉar la aferoj de la reĝo estis ordinare
farataj post konsiliĝo kun ĉiuj konantoj de leĝo kaj
juro; 14 kaj la plej proksimaj al li estis: Karŝena, Ŝetar,
Admata, Tarŝiŝ, Meres, Marsena, kaj Memuĥan, la sep
princoj Persaj kaj Medaj, kiuj havis la rajton rigardi
la vizaĝon de la reĝo kaj okupis la unuan lokon en
la regno): 15 Kiel oni laŭ la leĝo devas agi kun la
reĝino Vaŝti pro tio, ke ŝi ne plenumis la ordonon de
la reĝo Aĥaŝveroŝ, donitan per la eŭnukoj? 16 Tiam
diris Memuĥan antaŭ la reĝo kaj la princoj: La reĝino
Vaŝti estas kulpa, ne sole kontraŭ la reĝo, sed kontraŭ
ĉiuj princoj, kaj kontraŭ ĉiuj popoloj, kiuj troviĝas
en ĉiuj landoj de la reĝo Aĥaŝveroŝ; 17 ĉar la ago
de la reĝino fariĝos konata al ĉiuj virinoj tiel, ke ili
malrespektos siajn edzojn, dirante: La reĝo Aĥaŝveroŝ
ordonis venigi al li la reĝinon Vaŝti, kaj ŝi ne iris. 18
Nun la Persaj kaj Medaj princedzinoj, kiuj aŭdis pri la
ago de la reĝino, parolos tiel same al ĉiuj princoj de la
reĝo; kaj estos sufiĉe da malhonoro kaj da ĉagreno. 19
Se al la reĝo plaĉas, oni elirigu ordonon de la reĝo,
kaj oni enskribu ĝin kiel nemalobeeblan leĝon de
Persujo kaj Medujo, ke la reĝino Vaŝti ne venu plu
antaŭ la reĝon Aĥaŝveroŝ; kaj ŝian reĝinecon la reĝo
transdonu al alia virino, kiu estas pli bona ol ŝi. 20
Kiam la ordono, kiun la reĝo faris, estos aŭdita en lia
tuta regno, kiel ajn granda ĝi estas, tiam ĉiuj virinoj
respektos siajn edzojn, de la grandaj ĝis la malgrandaj.
21 La parolo plaĉis al la reĝo kaj al la princoj, kaj la
reĝo agis konforme al la parolo de Memuĥan. 22 Kaj li
sendis leterojn en ĉiujn landojn de la reĝo, en ĉiun
landon laŭ ĝia skribmaniero kaj al ĉiu popolo en ĝia
lingvo, ke ĉiu viro estu ĉefo en sia domo kaj postulu
paroladon en la lingvo de lia popolo.

**2** Post tiu afero, kiam kvietiĝis la kolero de la reĝo
Aĥaŝveroŝ, li rememoris pri Vaŝti, kaj pri tio, kion
ŝi faris kaj kio estis dekretita pri ŝi. 2 Kaj diris la
junuloj de la reĝo, kiuj servadis al li: Oni serĉu por la
reĝo belajn junajn virgulinojn; 3 kaj la reĝo starigu en
ĉiuj landoj de sia regno oficistojn, kiuj kolektus ĉiujn
belajn junajn virgulinojn en la kastelurbon Ŝuŝan,
en la virinejon, sub la inspektadon de Hegaj, la reĝa
eŭnuko, gardisto de la virinoj, kaj oni donu al ili iliajn
beligaĵojn; 4 kaj la junulino, kiu plaĉos al la okuloj
de la reĝo, fariĝos reĝino anstataŭ Vaŝti. Kaj la afero
plaĉis al la reĝo, kaj li tiel faris. 5 En la kastelurbo
Ŝuŝan estis Judo, kies nomo estis Mordeĥaj, filo de
Jair, filo de Ŝimei, filo de Kiŝ, Benjamenido; 6 kiu estis
transloĝigita el Jerusalem kune kun la transloĝigitoj,
kiuj estis forkondukitaj kun Jeĥonja, reĝo de Judujo,
kaj kiujn transloĝigis Nebukadnecar, reĝo de Babel. 7
Li estis prizorganto de Hadasa, kiu ankaŭ estis nomata
Ester, filino de lia onklo, ĉar ŝi ne havis patron nek
patrinon. La junulino estis belstatura kaj belvizaĝa.
Kiam mortis ŝiaj gepatroj, Mordeĥaj prenis ŝin al si
kiel filinon. 8 Kiam estis aŭdigita la ordono de la reĝo
kaj lia leĝo, kaj kiam oni kolektis multe da knabinoj
en la kastelurbon Ŝuŝan sub la inspekton de Hegaj,

tiam ankaŭ Ester estis prenita en la reĝan domon sub
la inspekton de Hegaj, la gardisto de la virinoj. 9 La
knabino plaĉis al li kaj akiris lian favoron, kaj li rapide
donis al ŝi ŝiajn beligaĵojn kaj ŝian destinitaĵon, kaj
sep knabinojn elektitajn el la domo de la reĝo; kaj li
transloĝigis ŝin kun ŝiaj knabinoj en la plej bonan
parton de la virinejo. 10 Ester ne diris pri sia popolo
nek pri sia patrujo, ĉar Mordeĥaj ordonis al ŝi, ke ŝi ne
diru. 11 Ĉiutage Mordeĥaj iradis antaŭ la korto de la
virinejo, por sciiĝi pri la farto de Ester, kaj pri tio, kio
okazas al ŝi. 12 Kiam por ĉiu knabino venis la vico iri
al la reĝo Aĥaŝveroŝ, post kiam dum dek du monatoj
estis farata al ŝi la beligado destinita por la virinoj
(ĉar tiel longe daŭris la tempo de ilia beligado: ses
monatoj per mirha oleo, kaj ses monatoj per aromaĵoj
kaj per aliaj ŝmiraĵoj), 13 tiam la knabino eniris al la
reĝo. Ĉion, kion ŝi diris, oni donis al ŝi, por ke ŝi iru
kun tio el la virinejo en la reĝan domon. 14 Vespere
ŝi eniris, kaj matene ŝi revenis en la virinejon duan,
sub la inspekton de Ŝaaŝgaz, reĝa eŭnuko, gardisto de
la kromvirinoj; ŝi jam ne plu iris al la reĝo, krom en
la okazo, se la reĝo ŝin deziris kaj se ŝi estis vokita
laŭnome. 15 Kiam por Ester, filino de Abiĥail, onklo
de Mordeĥaj, kiu prenis ŝin al si kiel filinon, venis la
vico iri al la reĝo, ŝi nenion petis, krom nur tio, kion
diris Hegaj, la reĝa eŭnuko, gardisto de la virinoj.
Kaj Ester akiris la favoron de ĉiuj, kiuj ŝin vidis. 16
Ester estis prenita al la reĝo Aĥaŝveroŝ en lian reĝan
domon en la deka monato, tio estas en la monato
Tebet, en la sepa jaro de lia reĝado. 17 Kaj la reĝo
ekamis Esteron pli ol ĉiujn edzinojn, kaj ŝi akiris ĉe
li simpation kaj favoron pli ol ĉiuj virgulinoj; kaj
li metis reĝan kronon sur ŝian kapon kaj faris ŝin
reĝino anstataŭ Vaŝti. 18 Kaj la reĝo faris grandan
festenon por ĉiuj siaj princoj kaj servantoj, festenon
je la honoro de Ester; kaj li donis ripozon al la landoj
kaj disdonis reĝajn donacojn. 19 Kaj kiam oni la duan
fojon kolektis junulinojn, Mordeĥaj sidis ĉe la pordego
de la reĝo. 20 Ester ankoraŭ ne diris pri sia patrujo
kaj pri sia popolo, kiel ordonis al ŝi Mordeĥaj; kaj
la dirojn de Mordeĥaj Ester plenumadis tiel same,
kiel tiam, kiam ŝi estis sub lia prizorgado. 21 En tiu
tempo, kiam Mordeĥaj sidadis ĉe la pordego de la
reĝo, ekkoleris Bigtan kaj Tereŝ, du korteganoj de la
reĝo el la sojlogardistoj, kaj ili intencis meti manon
sur la reĝon Aĥaŝveroŝ. 22 Pri tio eksciis Mordeĥaj, kaj
li diris al la reĝino Ester, kaj Ester diris tion al la reĝo
en la nomo de Mordeĥaj. 23 La afero estis esplorita
kaj trovita vera, kaj oni pendigis ambaŭ sur arbo. Kaj
tio estis enskribita en la kronikon ĉe la reĝo.

3 Post tiuj okazintaĵoj la reĝo Aĥaŝveroŝ eminentigis
Hamanon, filon de Hamedata, la Agagidon, altigis
lin kaj starigis lian seĝon super ĉiuj princoj, kiuj
estis ĉe li. 2 Kaj ĉiuj servantoj de la reĝo, kiuj estis
ĉe la pordego de la reĝo, klinadis sin kaj ĵetadis sin
vizaĝaltere antaŭ Haman, ĉar tiel ordonis pri li la
reĝo. Sed Mordeĥaj sin ne klinadis kaj ne ĵetadis
sin vizaĝaltere. 3 La servantoj de la reĝo, kiuj estis
ĉe la pordego de la reĝo, diris al Mordeĥaj: Kial vi
malobeas la ordonon de la reĝo? 4 Ĉar ili diradis tion
al li ĉiutage kaj li ne obeis ilin, tial ili raportis tion al
Haman, por vidi, ĉu la vortoj de Mordeĥaj konservos
sian forton; ĉar li diris al ili, ke li estas Judo. 5 Kiam
Haman vidis, ke Mordeĥaj ne klinas sin kaj ne ĵetas sin
vizaĝaltere antaŭ li, tiam Haman pleniĝis de kolero. 6
Sed li trovis nesufiĉa meti la manon sur Mordeĥajon;
ĉar oni diris al li, el kiu popolo Mordeĥaj estas, tial
Haman ekintencis ekstermi ĉiujn Judojn, kiuj estis en
la tuta regno de Aĥaŝveroŝ, la popolon de Mordeĥaj.
7 En la unua monato, tio estas en la monato Nisan,
en la dek-dua jaro de la reĝado de Aĥaŝveroŝ, oni
ĵetadis pur'on, tio estas loton, antaŭ Haman, de tago
al tago kaj de monato al monato, ĝis la dek-dua, tio
estas ĝis la monato Adar. 8 Kaj Haman diris al la reĝo
Aĥaŝveroŝ: Ekzistas unu popolo, disĵetita kaj dissemita
inter la popoloj en ĉiuj landoj de via regno; iliaj leĝoj
estas malsimilaj al la leĝoj de ĉiuj popoloj, kaj la
leĝojn de la reĝo ili ne plenumas; ne decas al la reĝo
tiel restigi ilin. 9 Se al la reĝo plaĉas, oni preskribu
ekstermi ilin; tiam dek mil kikarojn da arĝento mi
pesos en la manojn de la oficistoj, por enporti en
la kason de la reĝo. 10 Tiam la reĝo deprenis sian
ringon de sia mano, kaj donis ĝin al Haman, filo de
Hamedata, la Agagido, malamiko de la Judoj. 11 Kaj la
reĝo diris al Haman: La arĝento estas transdonata al
vi, kaj ankaŭ la popolo, por fari al ĝi tion, kio plaĉas al
vi. 12 Kaj oni vokis la skribistojn de la reĝo en la unua
monato, en ĝia dek-tria tago, kaj oni skribis konforme
al ĉiuj ordonoj de Haman al la satrapoj de la reĝo,
kaj al la regionestroj, kiuj estis super ĉiu regiono,
kaj al la princoj de ĉiu popolo, en ĉiun landon laŭ
ĝia skribmaniero kaj al ĉiu popolo en ĝia lingvo; en
la nomo de la reĝo Aĥaŝveroŝ tio estis skribita kaj

sigelita per la ringo de la reĝo. 13 Kaj oni sendis per
kurieroj leterojn en ĉiujn landojn de la reĝo, ke oni
ekstermu, mortigu, kaj pereigu ĉiujn Judojn, de junulo
ĝis maljunulo, la infanojn kaj la virinojn, en unu tago,
en la dek-tria tago de la dek-dua monato, tio estas de
la monato Adar, kaj ilian havaĵon oni disrabu. 14 Kopio
de la letero estis transdonota kiel leĝo en ĉiun landon
kaj proklamota al ĉiuj popoloj, por ke ili estu pretaj al
tiu tago. 15 La kurieroj eliris rapide kun la ordono de
la reĝo. La leĝo estis donita en la kastelurbo Ŝuŝan. La
reĝo kaj Haman sidiĝis, por drinki, sed la urbo Ŝuŝan
estis konsternita.

**4** Kiam Mordeĥaj eksciis ĉion, kio fariĝis, tiam
Mordeĥaj disŝiris siajn vestojn, metis sur sin
sakaĵon kaj cindron, eliris en la mezon de la urbo, kaj
kriis per laŭta kaj maldolĉa voĉo. 2 Kaj li venis ĝis
antaŭ la pordego de la reĝo, ĉar estis malpermesite
eniri en sakaĵo en la pordegon de la reĝo. 3 Kaj
en ĉiu lando, sur ĉiu loko, kien venis la ordono
de la reĝo kaj lia dekreto, estis granda malĝojo ĉe
la Judoj, fastado, plorado, kaj ĝemado; kaj multaj
kuŝis en sakaĵo kaj cindro. 4 Kaj venis la servistinoj
de Ester kaj ŝiaj eŭnukoj, kaj rakontis al ŝi. Kaj la
reĝino forte konsterniĝis. Kaj ŝi sendis vestojn, por
vesti Mordeĥajon kaj depreni de li la sakaĵon; sed li
ne akceptis. 5 Kaj Ester alvokis Hataĥon, unu el la
eŭnukoj de la reĝo, kiun ĉi tiu destinis por servado
al ŝi, kaj ŝi sendis lin al Mordeĥaj, por ekscii, kio kaj
pro kio tio estas. 6 Hataĥ eliris al Mordeĥaj sur la
urban placon, kiu estis antaŭ la pordego de la reĝo. 7
Kaj Mordeĥaj rakontis al li ĉion, kio okazis al li, kaj
pri la difinita sumo da mono, kiun Haman promesis
doni pese en la kason de la reĝo pro la Judoj, por
ekstermi ilin. 8 Kaj kopion de la letera ordono, kiu
estis donita en Ŝuŝan, por ilin ekstermi, li donis al
li, por montri al Ester kaj sciigi al ŝi, ordonante al ŝi
iri al la reĝo, por petegi lin pri ŝia popolo. 9 Hataĥ
venis kaj transdonis al Ester la vortojn de Mordeĥaj.
10 Kaj Ester diris al Hataĥ, ordonante, ke li diru al
Mordeĥaj: 11 Ĉiuj servantoj de la reĝo kaj la popolo en
la landoj de la reĝo scias, ke por ĉiu viro aŭ virino,
kiu eniris al la reĝo en la internan korton ne vokite,
ekzistas nur unu leĝo, nome la morto, krom nur en
la okazo, se la reĝo etendas al li sian oran sceptron
— tiam li restas vivanta; kaj mi ne estas vokita iri al
la reĝo jam de tridek tagoj. 12 Kiam oni raportis al
Mordeĥaj la vortojn de Ester, 13 tiam Mordeĥaj sendis
respondon al Ester: Ne pensu en via animo, ke en
la reĝa domo vi saviĝos sola el ĉiuj Judoj. 14 Se vi
silentos en ĉi tiu tempo, tiam liberigo kaj savo venos
al la Judoj de alia loko; sed vi kaj la domo de via patro
pereos. Kaj kiu scias, ĉu ne por tia tempo vi atingis
reĝinecon? 15 Tiam Ester diris, ke oni respondu al
Mordeĥaj: 16 Iru, kunvenigu ĉiujn Judojn, kiuj troviĝas
en Ŝuŝan, fastu por mi, ne manĝu kaj ne trinku dum
tri tagoj, tage kaj nokte; ankaŭ mi kaj miaj servistinoj
fastos tiel same; poste mi iros al la reĝo, kvankam tio
estas kontraŭleĝa; kaj se mi pereos, mi pereu. 17 Kaj
Mordeĥaj iris, kaj faris ĉion, kion komisiis al li Ester.

**5** En la tria tago Ester vestis sin reĝe, kaj stariĝis
sur la interna korto de la reĝa domo, kontraŭ la
domo de la reĝo. La reĝo sidis sur sia reĝa trono en la
reĝa domo, kontraŭ la enirejo de la domo. 2 Kiam la
reĝo ekvidis la reĝinon Ester, starantan sur la korto, ŝi
trovis favoron en liaj okuloj, kaj la reĝo etendis al
Ester la oran sceptron, kiu estis en lia mano; tiam
Ester aliris, kaj ektuŝis la pinton de la sceptro. 3 Kaj la
reĝo diris al ŝi: Kio estas al vi, ho reĝino Ester, kaj
kia estas via peto? se tio estas eĉ duono de la regno,
ĝi estos donita al vi. 4 Kaj Ester respondis: Se al la
reĝo plaĉas, la reĝo kune kun Haman venu hodiaŭ al
la festeno, kiun mi faris por li. 5 Tiam la reĝo diris:
Venigu plej rapide Hamanon, por plenumi tion, kion
diris Ester. Kaj la reĝo kaj Haman venis al la festeno,
kiun faris Ester. 6 Kaj la reĝo diris al Ester dum la
trinkado de vino: Kion vi petas? tio estos donita al vi;
kaj kia estas via deziro? ĝis duono de la regno ĝi estos
plenumita. 7 Ester respondis kaj diris: Jen estas mia
peto kaj deziro: 8 se mi akiris favoron en la okuloj de
la reĝo, kaj se al la reĝo plaĉas plenumi mian peton
kaj fari mian deziron, la reĝo kun Haman venu al la
festeno, kiun mi faros por ili; kaj morgaŭ mi faros,
kion la reĝo diris. 9 Haman eliris en tiu tago, gaja kaj
bonhumora. Sed kiam Haman ekvidis Mordeĥajon ĉe
la reĝa pordego, kaj tiu ne leviĝis kaj ne moviĝis antaŭ
li, tiam Haman pleniĝis de kolero kontraŭ Mordeĥaj.
10 Tamen Haman detenis sin, kaj iris hejmen. Kaj li
sendis, kaj venigis al si siajn amikojn kaj sian edzinon
Zereŝ. 11 Kaj Haman rakontis al ili pri sia granda
riĉeco, pri la multo de siaj filoj, kaj pri ĉio, per kio
la reĝo lin altigis kaj starigis lin super la princoj kaj
servantoj de la reĝo. 12 Kaj Haman diris: Eĉ la reĝino

Ester invitis kun la reĝo al la festeno, kiun ŝi faris,
neniun krom mi; ankaŭ por morgaŭ mi estas invitita
al ŝi kun la reĝo. 13 Sed ĉio ĉi tio ne kontentigas min
tiel longe, kiel mi vidas, ke la Judo Mordeĥaj sidas ĉe
la pordego de la reĝo. 14 Tiam diris al li lia edzino
Zereŝ kaj ĉiuj liaj amikoj: Oni pretigu arbon, havantan
la alton de kvindek ulnoj, kaj matene diru al la reĝo,
ke oni pendigu sur ĝi Mordeĥajon; kaj poste iru gaje
kun la reĝo al la festeno. Tio plaĉis al Haman, kaj li
pretigis la arbon.

6 En tiu nokto la reĝo ne povis dormi; kaj li ordonis
alporti la memoraĵan libron de la kronikoj, kaj oni
legis ilin antaŭ la reĝo. 2 Kaj tie troviĝis skribite,
kiel Mordeĥaj raportis pri Bigtan kaj Tereŝ, la du
reĝaj korteganoj el la sojlogardistoj, kiuj intencis
meti manon sur la reĝon Aĥaŝveroŝ. 3 Tiam la reĝo
diris: Kian honoron kaj distingon oni faris pro tio al
Mordeĥaj? Kaj la junuloj servistoj de la reĝo respondis:
Nenio estas farita al li. 4 La reĝo diris: Kiu estas sur
la korto? Dume Haman estis veninta sur la eksteran
korton de la reĝa domo, por diri al la reĝo, ke oni
pendigu Mordeĥajon sur la arbo, kiun li pretigis por
li. 5 La junuloj de la reĝo diris al li: Jen Haman staras
sur la korto. Kaj la reĝo diris: Li eniru. 6 Haman eniris.
Kaj la reĝo diris al li: Kion oni faru al tiu homo, kiun
la reĝo deziras honori? Haman pensis en sia koro:
Al kiu la reĝo povas deziri fari honoron krom mi? 7
Kaj Haman diris al la reĝo: Se al iu la reĝo volas fari
honoron, 8 oni alportu reĝan veston, kiun portis sur
si la reĝo, kaj ĉevalon, sur kiu rajdis la reĝo, kiam sur
lian kapon estis metita la reĝa krono; 9 oni donu la
veston kaj la ĉevalon en la manon de unu el la plej
eminentaj reĝaj princoj, ke oni vestu la homon, kiun
la reĝo deziras honori, kaj rajdigu lin sur la ĉevalo sur
la strato de la urbo, kaj oni proklamadu antaŭ li: Tiele
estas farate al la homo, kiun la reĝo volas honori. 10
Tiam la reĝo diris al Haman: Rapide prenu la veston
kaj la ĉevalon, kiel vi diris, kaj agu tiel kun la Judo
Mordeĥaj, kiu sidas ĉe la pordego de la reĝo; mankigu
nenion el ĉio, kion vi diris. 11 Haman prenis la veston
kaj la ĉevalon, kaj vestis Mordeĥajon, kaj rajdigis lin
tra la strato de la urbo, kaj proklamadis antaŭ li: Tiele
estas farate al la homo, kiun la reĝo volas honori. 12
Poste Mordeĥaj revenis al la pordego de la reĝo; kaj
Haman rapidis hejmen, malĝoja kaj kun kovrita kapo.
13 Haman rakontis al sia edzino Zereŝ kaj al ĉiuj siaj
amikoj ĉion, kio okazis al li. Kaj diris al li liaj saĝuloj
kaj lia edzino Zereŝ: Se el la gento de la Judoj estas
Mordeĥaj, antaŭ kiu vi komencis fali, vi nenion povas
fari kontraŭ li, sed vi plue falos antaŭ li. 14 Dum ili
ankoraŭ parolis kun li, venis la eŭnukoj de la reĝo
kaj rapidigis Hamanon iri al la festeno, kiun pretigis
Ester.

7 La reĝo kaj Haman venis, por festeni ĉe la reĝino
Ester. 2 Kaj ankaŭ en la dua tago, dum la trinkado
de vino, la reĝo diris al Ester: Kion vi petas, ho reĝino
Ester? tio estos donita al vi; kaj kia estas via deziro?
ĝis duono de la regno ĝi estos plenumita. 3 Tiam la
reĝino Ester respondis kaj diris: Se mi trovis favoron
en viaj okuloj, ho reĝo, kaj se al la reĝo plaĉas, tiam
mia vivo estu donacita al mi laŭ mia peto, kaj mia
popolo laŭ mia deziro; 4 ĉar ni estas venditaj, mi
kaj mia popolo, por ekstermo, mortigo, kaj pereigo.
Se ni almenaŭ estus venditaj nur por esti sklavoj
kaj sklavinoj, mi silentus, kvankam la malamiko ne
kompensus la malprofiton de la reĝo. 5 Tiam la reĝo
Aĥaŝveroŝ diris al la reĝino Ester: Kiu li estas kaj kie li
estas, tiu, kiu prenis en sian koron la kuraĝon agi tiel?
6 Kaj Ester respondis: La malamanto kaj malamiko
estas ĉi tiu malbona Haman. Kaj Haman ektremis
antaŭ la reĝo kaj la reĝino. 7 La reĝo leviĝis kolere de
la vintrinkado, kaj iris en la ĝardenon de la palaco;
sed Haman restis, por peti pri sia vivo la reĝinon
Ester, ĉar li vidis, ke la reĝo destinis por li malbonan
sorton. 8 Kiam la reĝo revenis el la palaca ĝardeno
en la ĉambron de la festeno, Haman estis falinta sur
la litbenkon, sur kiu sidis Ester. Tiam la reĝo diris:
Eĉ perforti la reĝinon li volas ĉe mi en la domo! La
vorto eliris el la buŝo de la reĝo, kaj oni kovris al
Haman la vizaĝon. 9 Ĥarbona, unu el la eŭnukoj antaŭ
la reĝo, diris: Jen eĉ la arbo, kiun Haman pretigis
por Mordeĥaj, kiu parolis bonon por la reĝo, staras
en la domo de Haman; ĝi havas la alton de kvindek
ulnoj. Tiam la reĝo diris: Pendigu lin sur ĝi. 10 Kaj oni
pendigis Hamanon sur la arbo, kiun li pretigis por
Mordeĥaj. Kaj la kolero de la reĝo kvietiĝis.

8 En tiu tago la reĝo Aĥaŝveroŝ transdonis al la
reĝino Ester la domon de Haman, la malamiko
de la Judoj; kaj Mordeĥaj venis antaŭ la reĝon, ĉar
Ester diris, kio li estas por ŝi. 2 Kaj la reĝo deprenis
sian ringon, kiun li forprenis de Haman, kaj donis
ĝin al Mordeĥaj; kaj Ester starigis Mordeĥajon super

la domo de Haman. 3 Kaj Ester plue parolis antaŭ la
reĝo, kaj ĵetis sin antaŭ liajn piedojn, kaj ploris kaj
petegis lin, ke li neniigu la malbonaĵon de Haman, la
Agagido, kaj lian planon, kiun li entreprenis kontraŭ
la Judoj. 4 La reĝo etendis al Ester sian oran sceptron,
kaj Ester leviĝis kaj stariĝis antaŭ la reĝo. 5 Kaj ŝi
diris: Se al la reĝo plaĉas, kaj se mi trovis favoron
antaŭ li, se la afero ŝajnas al li ĝusta, kaj se li havas
simpation por mi: tiam estu skribate, ke oni revoku la
leterojn, kiujn elpensis Haman, filo de Hamedata, la
Agagido, kaj kiujn li skribis, por ekstermi la Judojn,
kiuj troviĝas en ĉiuj landoj de la reĝo; 6 ĉar kiel mi
povus vidi la malfeliĉon, kiu trafas mian popolon? kaj
kiel mi povus vidi la pereon de miaj samgentanoj? 7
Tiam la reĝo Aĥaŝveroŝ diris al la reĝino Ester kaj al la
Judo Mordeĥaj: Jen la domon de Haman mi transdonis
al Ester, kaj lin mem oni pendigis sur arbo, pro tio, ke
li metis sian manon sur la Judojn; 8 skribu do pri la
Judoj en la nomo de la reĝo tion, kio plaĉas al vi, kaj
sigelu per la reĝa ringo; ĉar leteron, skribitan en la
nomo de la reĝo kaj sigelitan per la reĝa ringo, oni ne
povas revoki. 9 Kaj oni vokis la skribistojn de la reĝo
en tiu tempo, en la tria monato, tio estas en la monato
Sivan, en ĝia dudek-tria tago; kaj oni skribis ĉion tiel,
kiel ordonis Mordeĥaj, al la Judoj, al la satrapoj, al la
regionestroj, kaj al la princoj de la landoj, kiuj estis
de Hindujo ĝis Etiopujo, cent dudek sep landoj, al
ĉiu lando laŭ ĝia skribmaniero kaj al ĉiu popolo en
ĝia lingvo, ankaŭ al la Judoj laŭ ilia skribmaniero kaj
en ilia lingvo. 10 Li skribigis en la nomo de la reĝo
Aĥaŝveroŝ, kaj sigelis per la reĝa ringo, kaj sendis per
rajdantaj kurieroj sur bone kurantaj bonrasaj ĉevaloj
leterojn pri tio, 11 ke la reĝo permesas al la Judoj en
ĉiuj urboj kolektiĝi kaj stariĝi, por defendi sian vivon,
ekstermi, mortigi, kaj pereigi ĉiujn fortulojn de la
popolo kaj de la lando, kiuj atakos ilin, la infanojn, kaj
la virinojn, kaj disrabi ilian havaĵon, 12 en la daŭro
de unu tago en ĉiuj landoj de la reĝo Aĥaŝveroŝ,
en la dek-tria tago de la dek-dua monato, tio estas
de la monato Adar; 13 ke oni donu kopion de ĉi tiu
ordonletero kiel leĝon, proklamotan al ĉiuj popoloj,
kaj ke la Judoj estu pretaj por tiu tago, por venĝi al
siaj malamikoj. 14 La kurieroj, rajdantaj sur bonrasaj
ĉevaloj, elrajdis tuj kaj rapide kun la ordono de la
reĝo. La leĝo estis donita en la kastelurbo Ŝuŝan. 15
Mordeĥaj eliris de la reĝo en reĝa vesto el blua kaj
blanka ŝtofo, kun granda ora krono, kaj en mantelo
bisina kaj purpura. Kaj la urbo Ŝuŝan ĝojkriis kaj estis
gaja. 16 Ĉe la Judoj estis lumo kaj ĝojo, gajeco kaj
triumfo. 17 Kaj en ĉiu lando kaj en ĉiu urbo, sur ĉiu
loko, kien atingis la ordono kaj dekreto de la reĝo,
estis ĉe la Judoj ĝojo kaj gajeco, festeno kaj festo. Kaj
multaj homoj el la popoloj de la lando fariĝis Judoj,
ĉar falis sur ilin timo antaŭ la Judoj.

9 En la dek-dua monato, tio estas en la monato
Adar, en ĝia dek-tria tago, kiam venis la tempo
de plenumo de la reĝa ordono kaj dekreto — en la
tago, kiam la malamikoj de la Judoj esperis superforti
ilin — la afero turniĝis, kaj la Judoj superfortis siajn
malamikojn. 2 La Judoj kolektiĝis en siaj urboj en
ĉiuj landoj de la reĝo Aĥaŝveroŝ, por etendi la manon
kontraŭ siajn malbondezirantojn; kaj neniu povis
kontraŭstari al ili, ĉar timo antaŭ ili falis sur ĉiujn
popolojn. 3 Kaj ĉiuj landestroj, satrapoj, regionestroj,
kaj oficistoj de la reĝo favoris la Judojn, ĉar falis sur
ilin timo antaŭ Mordeĥaj. 4 Ĉar Mordeĥaj estis granda
en la domo de la reĝo, kaj la famo pri li iris tra ĉiuj
landoj, ĉar la viro Mordeĥaj fariĝadis ĉiam pli kaj pli
granda. 5 Kaj la Judoj batis ĉiujn siajn malamikojn,
frapante per glavo, mortigante kaj ekstermante, kaj ili
faris al siaj malamikoj, kion ili volis. 6 En la kastelurbo
Ŝuŝan la Judoj mortigis kaj pereigis kvincent homojn;
7 ankaŭ Parŝandatan, Dalfonon, Aspatan, 8 Poratan,
Adaljan, Aridatan, 9 Parmaŝtan, Arisajon, Aridajon, kaj
Vajzatan, 10 la dek filojn de Haman, filo de Hamedata
kaj persekutanto de la Judoj, ili mortigis; sed sur la
havaĵon ili ne metis sian manon. 11 En la sama tago la
nombro de la mortigitoj en la kastelurbo Ŝuŝan estis
raportita al la reĝo. 12 Kaj la reĝo diris al la reĝino
Ester: En la kastelurbo Ŝuŝan la Judoj mortigis kaj
pereigis kvincent homojn kaj ankaŭ la dek filojn de
Haman; kion ili faris en la ceteraj regionoj de la reĝo?
Kion vi petas? tio estos donita al vi; kion vi ankoraŭ
deziras? tio estos plenumita. 13 Ester respondis: Se al
la reĝo plaĉas, estu permesite al la Judoj en Ŝuŝan
ankaŭ morgaŭ fari tion saman, kion hodiaŭ, kaj la dek
filojn de Haman oni pendigu. 14 Kaj la reĝo diris, ke
oni faru tiel. Kaj estis donita dekreto pri tio en Ŝuŝan,
kaj la dek filojn de Haman oni pendigis. 15 La Judoj,
kiuj estis en Ŝuŝan, kolektiĝis ankaŭ en la dek-kvara
tago de la monato Adar, kaj mortigis en Ŝuŝan tricent
homojn; sed sur la havaĵon ili ne metis sian manon.
16 Ankaŭ la ceteraj Judoj, kiuj estis en la landoj de la

reĝo, kolektiĝis kaj stariĝis, por defendi sian vivon kaj
por akiri trankvilecon antaŭ siaj malamikoj, kaj ili
mortigis el siaj malamikoj sepdek kvin mil, sed sur la
havaĵon ili ne metis sian manon. 17 Tio estis en la dek-
tria tago de la monato Adar. Kaj en ĝia dek-kvara tago
estis ripozo, kaj oni faris ĝin tago de festeno kaj de
gajeco. 18 Sed la Judoj, kiuj estis en Ŝuŝan, kolektiĝis
en la dek-tria kaj en la dek-kvara tagoj; ripozo estis en
la dek-kvina tago, kaj ili faris ĝin tago de festeno kaj de
gajeco. 19 Tial la Judoj, kiuj loĝas en loĝlokoj kaj urboj
ne fortikigitaj, faras la dek-kvaran tagon de la monato
Adar tago de ĝojo kaj de festeno, festotago, kaj ili
sendas donacojn unuj al aliaj. 20 MordeĤaj priskribis
ĉiujn tiujn okazintaĵojn, kaj sendis leterojn al ĉiuj
Judoj, kiuj estis en ĉiuj landoj de la reĝo AĤaŝveroŝ,
la proksimaj kaj la malproksimaj, 21 ke ili akceptu
por si, ke ili festados ĉiujare la dek-kvaran tagon de
la monato Adar kaj ĝian dek-kvinan tagon, 22 kiel
tagojn, en kiuj la Judoj ricevis trankvilecon kontraŭ
siaj malamikoj, kaj kiel monaton, kiu turnis por ili
malĝojon en ĝojon, funebron en feston; ke ili faradu
ilin tagoj de festeno kaj de gajeco, de sendado de
donacoj unuj al aliaj kaj de donacado al malriĉuloj. 23
Kaj la Judoj akceptis tion, kion ili jam mem komencis
fari kaj pri kio skribis al ili MordeĤaj. 24 Ĉar Haman,
filo de Hamedata, la Agagido, kaj malamiko de ĉiuj
Judoj, intencis pereigi la Judojn kaj ĵetis pur'on, tio
estas loton, por ekstermi kaj pereigi ilin; 25 sed kiam
ŝi venis antaŭ la reĝon, ĉi tiu ordonis skribe, ke lia
malbona entrepreno, kiun li preparis por la Judoj,
turniĝu sur lian kapon; kaj ke oni pendigu lin kaj
liajn filojn sur arbo. 26 Pro tio oni donis al tiuj tagoj
la nomon Purim, laŭ la vorto pur. Tial, konforme al
ĉiuj vortoj de tiu letero, kaj al tio, kion ili mem vidis
koncerne tion kaj kio trafis ilin, 27 la Judoj decidis
kaj akceptis por si, por sia idaro, kaj por ĉiuj, kiuj
aliĝos al ili, ke ili nepre festados tiujn du tagojn laŭ la
preskribo kaj en la difinita tempo ĉiujare. 28 Tiuj tagoj
devas esti memorataj kaj festataj en ĉiuj generacioj,
en ĉiu familio, en ĉiu lando, kaj en ĉiu urbo; kaj tiuj
tagoj de Purim ne devas esti forigitaj ĉe la Judoj, kaj
la memoro pri ili ne devas malaperi inter ilia idaro.
29 Kaj la reĝino Ester, filino de AbiĤail, kaj la Judo
MordeĤaj skribis kun plena insisto, ke oni plenumu
tiun duan leteron pri Purim. 30 Kaj ili sendis leterojn
al ĉiuj Judoj en la cent dudek sep landojn de la regno
de AĤaŝveroŝ, kun vortoj de paco kaj de vero, 31 ke
ili festadu tiujn tagojn de Purim en ilia tempo, kiel
decidis pri ili la Judo MordeĤaj kaj la reĝino Ester, kaj
kiel ili mem akceptis por si kaj por sia idaro koncerne
la fastadon kaj preĝadon. 32 Kaj laŭ la ordono de Ester
oni konfirmis tiun historion de Purim kaj enskribis en
libron.

10 La reĝo AĤaŝveroŝ metis sub tributon la teron
kaj la insulojn de la maro. 2 La tuta historio pri
lia forto kaj lia potenco, kaj la detaloj pri la grandeco
de MordeĤaj, kiun la reĝo grandigis, estas priskribitaj
en la libro de kroniko de la reĝoj de Medujo kaj
Persujo. 3 Ĉar la Judo MordeĤaj estis la dua post la
reĝo AĤaŝveroŝ, granda inter la Judoj kaj amata inter
la multo de siaj fratoj, zorganta pri la bono de sia
popolo kaj donanta pacon al sia tuta idaro.

# Ijob

1 Estis iu homo en la lando Uc, lia nomo estis Ijob. Tiu
homo estis honesta, justa, diotima, kaj li evitadis
malbonon. 2 Al li naskiĝis sep filoj kaj tri filinoj. 3
Lia brutaro konsistis el sep mil ŝafoj, tri mil kameloj,
kvincent paroj da bovoj, kvincent azeninoj, kaj li havis
tre multe da servistoj; kaj tiu homo estis pli eminenta,
ol ĉiuj filoj de la oriento. 4 Liaj filoj havis la kutimon
faradi festenon en la domo de ĉiu el ili, ĉiu en sia
tago; kaj ili invitadis siajn tri fratinojn, por manĝi
kaj trinki kun ili. 5 Kaj ĉiufoje, kiam la rondo de la
festenaj tagoj estis finita, Ijob sendis, por sanktigi ilin,
kaj li leviĝis frue matene kaj alportis bruloferojn laŭ
la nombro de ili ĉiuj; ĉar, diris Ijob: Eble miaj filoj
pekis kaj blasfemis Dion en sia koro. Tiel agadis Ijob
ĉiam. 6 Unu tagon, kiam la filoj de Dio venis, por
stariĝi antaŭ la Eternulo, venis inter ili ankaŭ Satano.
7 Kaj la Eternulo diris al Satano: De kie vi venas? Kaj
Satano respondis al la Eternulo, kaj diris: Mi vagadis
sur la tero kaj rondiradis sur ĝi. 8 Kaj la Eternulo
diris al Satano: Ĉu vi atentis Mian servanton Ijob? ne
ekzistas ja sur la tero homo simila al li, tiel honesta,
justa, diotima, kaj evitanta malbonon. 9 Kaj Satano
respondis al la Eternulo, kaj diris: Ĉu vane Ijob timas
Dion? 10 Vi ŝirmis ja ĉiuflanke lin kaj lian domon,
kaj ĉion, kio apartenas al li; la farojn de liaj manoj
Vi benis, kaj liaj brutaroj disvastiĝis sur la tero. 11
Sed etendu nur Vian manon, kaj ektuŝu ĉion, kion
li havas; Vi vidos, ĉu li ne blasfemos Vin antaŭ Via
vizaĝo. 12 Tiam la Eternulo diris al Satano: Jen ĉio,
kion li havas, estas transdonata en vian manon; nur
sur lin mem ne etendu vian manon. Kaj Satano foriris
de antaŭ la Eternulo. 13 Unu tagon, kiam liaj filoj kaj
liaj filinoj estis manĝantaj kaj trinkantaj vinon en
la domo de ilia unuenaskita frato, 14 venis sendito
al Ijob, kaj diris: Dum la bovoj estis plugantaj kaj la
azeninoj estis paŝtiĝantaj apud ili, 15 superfalis ilin
la Ŝebaanoj, kaj forprenis ilin; kaj la servistojn ili
mortigis per glavo; saviĝis nur mi sola, por raporti al
vi. 16 Kiam ankoraŭ tiu parolis, venis alia, kaj diris:
Fajro de Dio falis el la ĉielo, bruligis la ŝafojn kaj la
servistojn, kaj ekstermis ilin; saviĝis nur mi sola, por
raporti al vi. 17 Kiam tiu ankoraŭ parolis, venis alia,
kaj diris: La Ĥaldeoj aranĝis tri taĉmentojn, atakis
la kamelojn kaj forprenis ilin, kaj la servistojn ili
mortigis per glavo; saviĝis nur mi sola, por raporti al
vi. 18 Dum tiu ankoraŭ parolis, venis alia, kaj diris:
Viaj filoj kaj viaj filinoj estis manĝantaj kaj trinkantaj
vinon en la domo de ilia unuenaskita frato; 19 kaj
jen granda vento leviĝis de la flanko de la dezerto,
puŝis la kvar angulojn de la domo, kaj ĉi tiu falis
sur la junulojn, kaj ili mortis; saviĝis nur mi sola,
por raporti al vi. 20 Tiam Ijob leviĝis, disŝiris sian
veston, pritondis sian kapon, ĵetis sin sur la teron, kaj
adorkliniĝis; 21 kaj li diris: Nuda mi eliris el la ventro
de mia patrino, kaj nuda mi revenos tien; la Eternulo
donis, kaj la Eternulo prenis; la nomo de la Eternulo
estu benata. 22 Malgraŭ ĉio ĉi tio Ijob ne pekis, kaj ne
eldiris blasfemon kontraŭ Dio.

2 Unu tagon, kiam la filoj de Dio venis, por stariĝi
antaŭ la Eternulo, venis ankaŭ Satano inter ili,
por stariĝi antaŭ la Eternulo. 2 Kaj la Eternulo diris
al Satano: De kie vi venas? Kaj Satano respondis
al la Eternulo, kaj diris: Mi vagadis sur la tero kaj
rondiradis sur ĝi. 3 Kaj la Eternulo diris al Satano:
Ĉu vi atentis Mian servanton Ijob? ne ekzistas sur la
tero homo simila al li, tiel honesta, justa, diotima, kaj
evitanta malbonon; kaj li ĝis nun ankoraŭ estas firma
en sia virteco, kvankam vi ekscitis Min kontraŭ li, por
pereigi lin senkulpe. 4 Tiam Satano respondis al la
Eternulo, kaj diris: Haŭto pro haŭto; kaj ĉion, kion
homo posedas, li fordonus pro sia vivo. 5 Sed etendu
Vian manon, kaj tuŝu liajn ostojn kaj lian karnon;
tiam Vi vidos, ke li blasfemos Vin antaŭ Via vizaĝo. 6
La Eternulo diris al Satano: Jen li estas transdonata en
vian manon; nur lian vivon konservu. 7 Satano foriris
de antaŭ la vizaĝo de la Eternulo, kaj frapis Ijobon per
turmentaj abscesoj de la plando de lia piedo ĝis lia
verto. 8 Li prenis potpecon, por skrapadi sin per ĝi,
sidante meze de cindro. 9 Kaj lia edzino diris al li: Vi
ĉiam ankoraŭ estas firma en via virteco! blasfemu
Dion, kaj mortu. 10 Sed li diris al ŝi: Vi parolas tiel,
kiel parolas iu el la malsaĝulinoj; ĉu bonon ni akceptu
de Dio, kaj malbonon ni ne akceptu? Malgraŭ ĉio ĉi
tio Ijob ne pekis per siaj lipoj. 11 Kiam la tri amikoj de
Ijob aŭdis pri tiu tuta malfeliĉo, kiu trafis lin, ili iris
ĉiu de sia loko, Elifaz, la Temanano, Bildad, la Ŝuĥano,
kaj Cofar, la Naamano, kaj kunvenis kune, por iri plori
kun li kaj konsoli lin. 12 Kiam ili levis siajn okulojn de
malproksime, ili ne rekonis lin; kaj ili levis sian voĉon
kaj ekploris; kaj ĉiu el ili disŝiris sian veston, kaj ĵetis
teron sur sian kapon, turnante sin al la ĉielo. 13 Kaj ili

sidis kun li sur la tero dum sep tagoj kaj sep noktoj,
kaj ne parolis al li eĉ unu vorton; ĉar ili vidis, ke la
suferado estas tre granda.

3 Poste Ijob malfermis sian buŝon, kaj malbenis
sian tagon. 2 Kaj Ijob ekparolis, kaj diris: 3 Pereu
la tago, en kiu mi naskiĝis, Kaj la nokto, kiu diris:
Embriiĝis homo. 4 Tiu tago estu malluma; Dio de
supre ne rigardu ĝin, Neniu lumo ekbrilu super ĝi. 5
Mallumo kaj tomba ombro ekposedu ĝin; Nubo ĝin
kovru; Eklipsoj de tago faru ĝin terura. 6 Tiun nokton
prenu mallumego; Ĝi ne alkalkuliĝu al la tagoj de la
jaro, Ĝi ne eniru en la kalkulon de la monatoj. 7 Ho,
tiu nokto estu soleca; Neniu ĝojkrio aŭdiĝu en ĝi. 8
Malbenu ĝin la malbenantoj de la tago, Tiuj, kiuj estas
pretaj eksciti levjatanon. 9 Mallumiĝu la steloj de ĝia
krepusko; Ĝi atendu lumon, kaj ĉi tiu ne aperu; Kaj la
palpebrojn de matenruĝo ĝi ne ekvidu; 10 Pro tio, ke
ĝi ne fermis la pordon de la utero de mia patrino Kaj
ne kaŝis per tio la malfeliĉon antaŭ miaj okuloj. 11
Kial mi ne mortis tuj el la utero, Ne senviviĝis post
la eliro el la ventro? 12 Kial akceptis min la genuoj?
Por kio estis la mamoj, ke mi suĉu? 13 Mi nun kuŝus
kaj estus trankvila; Mi dormus kaj havus ripozon, 14
Kune kun la reĝoj kaj la konsilistoj sur la tero, Kiuj
konstruas al si izolejojn, 15 Aŭ kun la potenculoj, kiuj
havas oron, Kiuj plenigas siajn domojn per arĝento;
16 Aŭ kiel abortitaĵo kaŝita mi ne ekzistus, Simile al la
infanoj, kiuj ne vidis lumon. 17 Tie la malpiuloj ĉesas
tumulti; Kaj tie ripozas tiuj, kies fortoj konsumiĝis. 18
Tie la malliberuloj kune havas ripozon; Ili ne aŭdas la
voĉon de premanto. 19 Malgranduloj kaj granduloj, tie
ili estas; Kaj sklavo estas libera de sia sinjoro. 20 Por
kio al suferanto estas donita la lumo, Kaj la vivo al
tiuj, kiuj havas maldolĉan animon, 21 Kiuj atendas la
morton, kaj ĝi ne aperas, Kiuj elfosus ĝin pli volonte
ol trezorojn, 22 Kiuj ekĝojus kaj estus ravitaj, Se ili
trovus tombon? 23 Al la homo, kies vojo estas kaŝita,
Kaj antaŭ kiu Dio starigis barilon? 24 Antaŭ ol mi
ekmanĝas panon, mi devas ĝemi, Kaj mia plorkriado
verŝiĝas kiel akvo; 25 Ĉar teruraĵo, kiun mi timis, trafis
min, Kaj tio, pri kio mi estis maltrankvila, venis al mi.
26 Mi ne havas trankvilon, mi ne havas kvieton, mi ne
havas ripozon; Trafis min kolero.

4 Kaj ekparolis Elifaz, la Temanano, kaj diris: 2 Se
oni provos diri al vi vorton, tio eble estos por vi
turmenta? Sed kiu povas deteni sin de parolado? 3
Jen vi multajn instruis, Kaj manojn senfortiĝintajn
vi refortigis; 4 Falantojn restarigis viaj vortoj, Kaj
fleksiĝantajn genuojn vi fortigis; 5 Kaj nun, kiam tio
trafis vin, vi perdis la forton; Ĝi ektuŝis vin, kaj vi
ektimis. 6 Ĉu ne via timo antaŭ Dio estas via konsolo?
Ĉu la virteco de viaj vojoj ne estas via espero? 7
Rememoru do, ĉu pereis iu senkulpa? Kaj kie virtuloj
estis ekstermitaj? 8 Kiel mi vidis, tiuj, kiuj plugis
pekojn kaj semis malbonagojn, Tiuj ilin rikoltas; 9
De la ekblovo de Dio ili pereas, Kaj de la ekspiro
de Lia kolero ili malaperas. 10 La kriado de leono
kaj la voĉo de leopardo silentiĝis, Kaj la dentoj de
junaj leonoj rompiĝis; 11 Leono pereis pro manko de
manĝaĵo, Kaj idoj de leonino diskuris. 12 Kaj al mi
kaŝe alvenis vorto, Kaj mia orelo kaptis parteton de
ĝi. 13 Dum meditado pri la vizioj de la nokto, Kiam
profunda dormo falas sur la homojn, 14 Atakis min
teruro kaj tremo, Kaj ĉiuj miaj ostoj eksentis timon.
15 Kaj spirito traflugis antaŭ mi, Kaj la haroj sur mia
korpo rigidiĝis. 16 Staris bildo antaŭ miaj okuloj, sed
mi ne povis rekoni ĝian aspekton; Estis silento, kaj mi
ekaŭdis voĉon, dirantan: 17 Ĉu homo estas pli justa ol
Dio? Ĉu viro estas pli pura ol lia Kreinto? 18 Vidu, al
Siaj servantoj Li ne konfidas, Kaj Siajn anĝelojn Li
trovas mallaŭdindaj: 19 Des pli koncerne tiujn, Kiuj
loĝas en argilaj dometoj, Fonditaj sur tero, Kaj kiujn
formanĝas vermoj. 20 De la mateno ĝis la vespero ili
disfalas, Pereas por ĉiam, kaj neniu tion atentas. 21 La
fadeno de ilia vivo estas distranĉita; Ili mortas, kaj ne
en saĝeco.

5 Voku do! ĉu iu respondos al vi? Kaj al kiu el la
sanktuloj vi vin turnos? 2 Malsaĝulon mortigas la
kolero, Kaj sensenculon pereigas la incitiĝemeco. 3 Mi
vidis malsaĝulon, kiu enradikiĝis, Kaj mi malbenis
subite lian loĝejon. 4 Malproksimaj de savo estos liaj
filoj; Oni disbatos ilin ĉe la pordego, Kaj neniu ilin
savos. 5 Lian rikoltaĵon formanĝos malsatulo, El inter
la dornoj li ĝin prenos, Kaj soifantoj englutos lian
havaĵon. 6 Ne el la polvo eliras malpiaĵo, Kaj ne el la
tero elkreskas malbonago. 7 Sed homo naskiĝas por
suferoj, Kiel birdoj por flugado supren. 8 Sed mi min
turnus al Dio, Kaj al Li mi transdonus mian aferon; 9
Al Tiu, kiu faras grandaĵojn, kiujn neniu povas esplori,
Mirindaĵojn, kiujn neniu povas kalkuli; 10 Kiu donas
pluvon sur la teron Kaj sendas akvon sur la kampojn,
11 Por starigi malaltulojn alte, Ke la afliktitoj leviĝu

savite. 12 Li detruas la intencojn de ruzuloj, Ke iliaj
manoj ne plenumas sian entreprenon. 13 Li kaptas la
saĝulojn per ilia ruzaĵo; Kaj la decido de maliculoj
fariĝas senvalora. 14 En la tago ili renkontas mallumon,
Kaj en tagmezo ili palpas, kiel en nokto. 15 Li savas
kontraŭ glavo, Kontraŭ la buŝo kaj mano de potenculo
Li savas malriĉulon. 16 Al la senhavulo aperas espero,
Kaj la malboneco fermas sian buŝon. 17 Feliĉa estas
la homo, kiun punas Dio; Kaj la moralinstruon de la
Plejpotenculo ne malŝatu; 18 Ĉar Li vundas, sed ankaŭ
bandaĝas; Li batas, sed Liaj manoj ankaŭ resanigas. 19
En ses malfeliĉoj Li vin savos; En la sepa ne tuŝos vin
la malbono. 20 En tempo de malsato Li savos vin de la
morto, Kaj en milito el la mano de glavo. 21 Kontraŭ la
vipo de lango vi estos kaŝita; Kaj vi ne timos ruinigon,
kiam ĝi venos. 22 Dum ruinigo kaj malsato vi ridos;
Kaj la bestojn de la tero vi ne timos; 23 Ĉar kun la
ŝtonoj de la kampo vi havos interligon, Kaj la bestoj
de la kampo havos pacon kun vi. 24 Kaj vi ekscios,
ke paco estas en via tendo; Vi esploros vian loĝejon,
kaj nenio mankos. 25 Kaj vi ekscios, ke grandnombra
estas via idaro Kaj via naskitaro estas kiel la herbo
de la tero. 26 En maljuneco vi iros en la tombon,
Kiel envenas garbaro en sia tempo. 27 Vidu, ni tion
esploris, kaj tiel ĝi estas; Atentu tion, kaj sciu tion.

6 Ijob respondis kaj diris: 2 Se estus pesita mia
ĉagreno, Kaj samtempe estus metita sur la pesilon
mia suferado, 3 Ĝi estus nun pli peza, ol la sablo ĉe la
maroj; Pro tio miaj vortoj estas plenaj de plendo. 4 Ĉar
la sagoj de la Plejpotenculo estas en mi, Ilian venenon
trinkas mia spirito; La teruraĵoj de Dio direktiĝis sur
min. 5 Ĉu krias sovaĝa azeno sur herbo? Ĉu bovo blekas
kolere ĉe sia manĝaĵo? 6 Ĉu oni manĝas sengustaĵon
sen salo? Ĉu havas guston la albumeno de ovo? 7 Kion
ne volis tuŝi mia animo, Tio nun estas abomeninde
mia manĝaĵo. 8 Ho, se mia peto plenumiĝus, Kaj
se Dio donus al mi tion, kion mi esperas! 9 Ho, se
Dio komencus kaj disbatus min, Donus liberecon al
Sia mano kaj frakasus min! 10 Tio estus ankoraŭ
konsolo por mi; Kaj mi ĝojus, se en la turmento Li
ne kompatus, Ĉar mi ne forpuŝis ja la vortojn de la
Sanktulo. 11 Kio estas mia forto, ke mi persistu? Kaj
kia estas mia fino, ke mi havu paciencon? 12 Ĉu mia
forto estas forto de ŝtonoj? Ĉu mia karno estas kupro?
13 Mi havas ja nenian helpon, Kaj savo estas forpuŝita
for de mi. 14 Al malfeliĉulo decas kompato de amiko,
Eĉ se li forlasas la timon antaŭ la Plejpotenculo. 15
Miaj fratoj trompas kiel torento, Kiel akvaj fluegoj,
kiuj pasas, 16 Kiuj estas malklaraj pro glacio, En kiuj
kaŝas sin neĝo; 17 En la tempo de degelo ili malaperas,
En la tempo de varmego ili forŝoviĝas de sia loko. 18 Ili
forklinas la direkton de sia vojo, Iras en la dezerton,
kaj malaperas. 19 Serĉas ilin per sia rigardo la vojoj de
Tema, Esperas je ili la karavanoj el Ŝeba; 20 Sed ili
hontas pro sia fido; Ili aliras, kaj ruĝiĝas de honto.
21 Nun vi neniiĝis; Vi ekvidis teruraĵon, kaj ektimis.
22 Ĉu mi diris: Donu al mi, El via havaĵo donacu pro
mi, 23 Savu min el la mano de premanto, Aŭ liberigu
min el la mano de turmentantoj? 24 Instruu min, kaj
mi eksilentos; Komprenigu al mi, per kio mi pekis.
25 Kial vi mallaŭdas pravajn vortojn? Kaj kion povas
instrui la moralinstruanto el vi? 26 Ĉu vi intencas
riproĉi pro vortoj? Sed paroloj de malesperanto iras
al la vento. 27 Eĉ orfon vi atakus, Kaj sub via amiko vi
fosus. 28 Nun, ĉar vi komencis, rigardu min; Ĉu mi
mensogos antaŭ via vizaĝo? 29 Rigardu denove, vi ne
trovos malpiaĵon; Ripetu, vi trovos mian pravecon
en la afero. 30 Ĉu estas peko sur mia lango? Ĉu mia
palato ne komprenas tion, kio estas malbona?

7 Difinita estas ja por la homo la limtempo sur la
tero, Kaj liaj tagoj estas kiel la tagoj de dungito. 2
Kiel sklavo, kiu sopiras al ombro, Kaj kiel dungito, kiu
atendas sian pagon, 3 Tiel mi ricevis sorte monatojn
vantajn, Kaj noktoj turmentaj estas nombritaj al mi. 4
Kiam mi kuŝiĝas, mi diras: Kiam mi leviĝos? Sed la
vespero fariĝas longa, kaj mi satiĝas de maltrankvileco
ĝis la tagiĝo. 5 Mia korpo estas kovrita de vermoj
kaj de pecoj da tero; Mia haŭto krevis kaj putras. 6
Miaj tagoj forflugis pli facile, ol bobeno de teksisto,
Kaj pasis, lasinte nenian esperon. 7 Memoru, ke mia
vivo estas bloveto, Ke miaj okuloj ne plu revidos
bonon; 8 Ne plu revidos min okulo de vidanto; Vi
volos ekrigardi min, sed mi jam ne ekzistos. 9 Nubo
pasas kaj foriras; Tiel ne plu revenas tiu, kiu iris en
Ŝeolon; (Sheol h7585) 10 Li ne plu revenas en sian domon;
Lia loko ne plu rekonos lin. 11 Tial mi ne detenos mian
buŝon; Mi parolos en la premiteco de mia spirito, Mi
plendos en la maldolĉeco de mia animo. 12 Ĉu mi
estas maro aŭ mara monstro, Ke Vi starigis gardon
por mi? 13 Kiam mi pensas, ke mia lito min konsolos,
Ke mia kuŝejo plifaciligos mian suferadon, 14 Tiam Vi
teruras min per sonĝoj, Timigas min per vizioj; 15 Kaj

mia animo deziras sufokiĝon, Miaj ostoj la morton. 16
Tedis al mi; ne eterne mi vivu; Forlasu min, ĉar miaj
tagoj estas vantaĵo. 17 Kio estas homo, ke Vi faras lin
granda, Ke Vi zorgas pri li, 18 Ke Vi rememoras lin
ĉiumatene, Elprovas lin ĉiumomente? 19 Kial Vi ne
deturnas Vin de mi, Ne lasas min libera eĉ tiom, ke mi
povu engluti mian salivon? 20 Se mi pekis, kion mi
per tio faris al Vi, ho gardanto de la homoj? Kial Vi
faris min celo de Viaj atakoj, Ke mi fariĝis ŝarĝo por
mi mem? 21 Kaj kial Vi ne deprenas mian pekon, ne
pardonas mian malbonagon? Jen mi ja baldaŭ kuŝos
en la tero; Kaj kiam Vi morgaŭ serĉos min, mi ne
ekzistos.

8 Kaj ekparolis Bildad, la Ŝuĥano, kaj diris: 2 Kiel
longe vi tiel parolos, Kaj la vortoj de via buŝo
estos kiel forta vento? 3 Ĉu Dio falsas la juĝon? Ĉu la
Plejpotenculo falsas la justecon? 4 Se viaj filoj pekis
kontraŭ Li, Li forpuŝis ilin pro ilia malbonago. 5 Se vi
serĉas Dion Kaj petegas la Plejpotenculon, 6 Se vi estas
pura kaj pia, Li maldormos super vi, Kaj restarigos la
bonstaton en via virta loĝejo. 7 Kaj se via komenco
estis malgranda, Via estonteco forte kreskos. 8 Ĉar
demandu la antaŭajn generaciojn, Kaj primeditu tion,
kion esploris iliaj patroj; 9 Ĉar ni estas de hieraŭ, kaj
ni nenion scias; Nia vivo sur la tero estas nur ombro.
10 Ili instruos vin, diros al vi, Kaj el sia koro eligos
vortojn. 11 Ĉu povas kreski kano sen malsekeco? Ĉu
kreskas junko sen akvo? 12 En tia okazo ĝi velksekiĝas
pli frue ol ĉiu herbo, Kiam ĝi estas ankoraŭ en sia
freŝeco, Kiam ĝi ankoraŭ ne estas detranĉita. 13 Tiaj
estas la vojoj de ĉiuj, kiuj forgesas Dion; Kaj pereas
la espero de hipokritulo, 14 Kies fido dehakiĝas, Kaj
kies espero estas araneaĵo. 15 Li apogas sin al sia
domo, sed ne restos staranta; Li ekkaptos ĝin, sed ne
povos sin teni. 16 Li estis verda antaŭ la suno, Kaj
super lia ĝardeno etendiĝas liaj branĉoj; 17 Amase
plektiĝas liaj radikoj, Inter ŝtonoj ili tenas sin forte;
18 Sed kiam oni elŝiras lin el lia loko, Ĝi malkonfesas
lin: Mi vin ne vidis. 19 Tia estas la ĝojo de lia vivo;
Kaj el la tero kreskas aliaj. 20 Vidu, Dio ne forpuŝas
virtulon Kaj ne subtenas la manon de malpiuloj. 21 Li
plenigos ankoraŭ vian buŝon per rido Kaj viajn lipojn
per ĝojkrioj. 22 Viaj malamantoj kovriĝos per honto;
Sed la tendo de malpiuloj malaperos.

9 Ijob respondis kaj diris: 2 Certe, mi scias, ke tiel
estas; Kaj kiel povas homo esti prava koncerne
Dion? 3 Se li volus havi kun Li juĝan disputon, Li
ne povus respondi al Li eĉ unu kontraŭ mil. 4 Li
estas saĝa per Sia koro kaj potenca per Sia forto;
Kiu kuraĝus stari kontraŭ Li kaj restus sendifekta?
5 Li forŝovas montojn, kaj ili eĉ ne rimarkas, Ke Li
renversis ilin en Sia kolero; 6 Li skuas la teron de ĝia
loko, Ke ĝiaj kolonoj tremas; 7 Li diras al la suno, kaj
ĝi ne leviĝas, Kaj la stelojn Li sigelfermas; 8 Li sola
etendas la ĉielon, Kaj Li iras sur la altaĵoj de la maro;
9 Li kreis la Grandan Ursinon, Orionon, kaj Plejadojn,
Kaj la stelojn de la sudo; 10 Li faras neesploreblajn
grandaĵojn, Kaj nekalkuleblajn mirindaĵojn. 11 Jen
Li preteriros preter mi, kaj mi tion eĉ ne vidos; Li
pasos, kaj mi eĉ ne rimarkos Lin. 12 Kiam Li kaptas,
kiu malpermesus al Li? Kiu dirus al Li: Kion Vi faras?
13 Li estas Dio, kaj Lian koleron oni ne povas haltigi;
Sub Li fleksiĝas la helpantoj de Rahab. 14 Des pli ĉu
mi povus respondi al Li, Ĉu mi povus elekti vortojn
kontraŭ Li? 15 Eĉ se mi estus prava, mi ne respondus;
Sed mi nur petegus mian juĝanton. 16 Se mi vokus kaj
Li respondus, Mi ne kredus, ke Li aŭdis mian voĉon,
17 Li, kiu povas frakasi min per ventego Kaj fari al
mi senkulpe multe da vundoj. 18 Li ne permesas al
mi trankviligi mian spiriton, Sed Li satigas min per
maldolĉo. 19 Se oni volas forton, Li estas potenca; Se
oni volas juĝon, kiu alvokos min? 20 Se mi montros
mian pravecon, mia propra buŝo min kondamnos; Se
mi montros min virtulo, Li montros min malbonagulo.
21 Mi estas senkulpa; mi ne zorgas pri mia animo,
Mi abomenas mian vivon. 22 Ĉio estas egala; tial mi
diras: Senkulpulon kaj malpiulon Li ambaŭ pereigas.
23 Kiam vipo subite ekbatas, Li ridas ĉe la elprovado de
senkulpuloj. 24 La tero estas transdonita en la manon
de malpiulo; La vizaĝon de ĝiaj juĝistoj Li kovras. Se
ne Li, tiam kiu? 25 Miaj tagoj estis pli rapidpiedaj ol
kuristo; Ili forkuris, ne vidis bonon; 26 Ili forkuris, kiel
ŝipetoj el kano, Kiel aglo flugas al manĝotaĵo. 27 Se mi
ekpensas: Mi forgesos mian plendon, Mi farlasos mian
mienon, kaj mi min gajigos: 28 Tiam mi ektremas
pro ĉiuj miaj suferoj; Mi scias, ke Vi ne rigardos min
kiel senkulpan. 29 Mi restos ja malprava; Por kio
do mi vane min turmentas? 30 Se mi lavus min per
neĝa akvo Kaj purigus miajn manojn per lesivo, 31
Eĉ tiam Vi trempus min en koto, Kaj miaj vestoj min
abomenus. 32 Ĉar Li ne estas homo simile al mi, Ke mi
povu respondi al Li, Ke ni povu ambaŭ iri al juĝo. 33
Ne ekzistas inter ni arbitracianto, Kiu povus meti sian

manon sur nin ambaŭ. 34 Li forigu de mi Sian vergon,
Kaj Lia teruro ne timigu min; 35 Tiam mi ekparolos,
kaj ne timos Lin, Ĉar ne tia mi estas en mi mem.

**10** Tedis al mia animo mia vivo; Mi fordonos min
al mia plendado; Mi parolos en la malĝojeco de
mia animo. 2 Mi diros al Dio: Ne kondamnu min,
Sciigu al mi, pro kio Vi malpacas kontraŭ mi. 3 Ĉu
Vi trovas tion bona, ke Vi turmentas, Ke Vi forpuŝas
la laboritaĵon de Viaj manoj, Sendas brilon sur la
entreprenon de malpiuloj? 4 Ĉu Vi havas okulojn
karnajn, Kaj ĉu Vi rigardas, kiel homo rigardas? 5 Ĉu
Viaj tagoj estas kiel la tagoj de homo, Aŭ ĉu Viaj jaroj
estas kiel la vivtempo de homo, 6 Ke Vi serĉas mian
kulpon Kaj penas trovi mian pekon, 7 Kvankam Vi
scias, ke mi ne estas malbonagulo, Sed el Via mano
neniu povas savi? 8 Viaj manoj min formis kaj faris
min tutan ĉirkaŭe, Kaj tamen Vi min pereigas! 9
Rememoru, ke kiel argilon Vi min prilaboris; Kaj Vi
returne faros min polvo. 10 Vi elverŝis ja min kiel
lakton, Kaj kiel fromaĝon Vi min kundensigis. 11 Per
haŭto kaj karno Vi min vestis, Per ostoj kaj tendenoj
Vi min plektis. 12 Vivon kaj bonon Vi donis al mi, Kaj
Via prizorgado gardis mian spiriton. 13 Sed ĉi tion
Vi kaŝis en Via koro; Mi scias, ke Vi tion intencis:
14 Se mi pekos, Vi tion rimarkos sur mi, Kaj mian
pekon Vi ne lasos senpuna. 15 Se mi agis malbone,
ve al mi! Se mi estas prava, mi ne povas tamen levi
mian kapon, Estante tute humiligita Kaj vidante mian
mizeron. 16 Se ĝi leviĝas, Vi ĉasas min kiel leono, Kaj
denove montras sur mi Vian mirindan potencon. 17
Vi elmetas kontraŭ mi novajn atestojn, Plifortigas
Vian koleron kontraŭ mi; Nova armeo min atakas. 18
Por kio Vi elirigis min el la ventro? Ho, se mi estus
pereinta, ke nenies okulo min vidu! 19 Tiam mi estus
kiel ne estinta; El la ventro mi estus transportita en la
tombon. 20 Mia vivo estas ja mallonga; Ĉesu do, lasu
min libera, por ke mi iom revigliĝu, 21 Antaŭ ol mi
foriros senrevene En la landon de mallumo kaj de
morta ombro, 22 En la landon, kie la lumo estas kiel
mallumo, Kie estas morta ombro kaj senordeco, Kie
estas lume kiel en mallumego.

**11** Kaj ekparolis Cofar, la Naamano, kaj diris: 2
Ĉu kontraŭ multe da vortoj oni ne povas doni
respondon? Kaj ĉu tiu, kiu multe parolas, estas prava?
3 Ĉu via senenhava parolado devas silentigi la homojn,
Por ke vi mokinsultu kaj neniu vin hontigu? 4 Vi
diras: Mia opinio estas ĝusta, Kaj mi estas pura antaŭ
Viaj okuloj. 5 Sed ho, se Dio ekparolus, Kaj malfermus
antaŭ vi Siajn lipojn, 6 Kaj malkaŝus antaŭ vi la
sekretojn de la saĝo, Kiu havas multoblan forton! Sciu,
ke ne ĉiujn viajn pekojn Dio rememoras. 7 Ĉu vi povas
eltrovi la esencon de Dio? Ĉu vi povas plene kompreni
la perfektecon de la Plejpotenculo? 8 Tio estas pli alta
ol la ĉielo; Kion vi povas fari? Tio estas pli profunda
ol Ŝeol; Kion vi povas ekscii? (Sheol h7585) 9 Pli longa ol
la tero estas ĝia mezuro, Kaj pli larĝa ol la maro. 10 Se
Li preteriros, kaj fermos, kaj faros juĝon, Tiam kiu
repuŝos Lin? 11 Ĉar Li konas la homojn malvirtajn; Li
vidas la malbonagojn, kiujn oni ne rimarkas. 12 Eĉ
vanta homo devas kompreni, Eĉ homo, kiu naskiĝis
sovaĝulo. 13 Se vi aranĝas vian koron Kaj etendas al
Li viajn manojn; 14 Se vi forigas la malvirton, kiu
estas en via mano, Kaj vi ne permesos al malbonaĵoj
resti en via tendo: 15 Tiam vi povos levi vian vizaĝon
sen difekto; Vi estos firma kaj ne timos. 16 Tiam vi
forgesos mizeron; Vi rememoros ĝin kiel forfluintan
akvon. 17 Kaj via vivo leviĝos pli hele ol la tagmezo, La
mallumo fariĝos kiel mateno. 18 Kaj vi estos trankvila,
ĉar ekzistas espero; Vi rigardos ĉirkaŭen, kaj iros
dormi en sendanĝereco. 19 Vi kuŝos, kaj neniu vin
timigos; Kaj multaj serĉos vian favoron. 20 Sed la
okuloj de malpiuloj konsumiĝos, Pereos por ili la
rifuĝo, Kaj ilia espero elspiros sian vivon.

**12** Kaj Ijob respondis kaj diris: 2 Certe, vi solaj estas
homoj, Kaj kun vi mortos la saĝo. 3 Mi ankaŭ
havas koron, kiel vi; Mi ne estas malpli valora ol vi;
Kiu ne povas paroli tiele? 4 Mi fariĝis mokataĵo por
mia amiko, Mi, kiu vokadis al Dio kaj estis aŭskultata;
Virtulo kaj senkulpulo fariĝis mokataĵo; 5 Malestimata
lucerneto li estas antaŭ la pensoj de feliĉuloj, Pretigita
por migrantoj. 6 Bonstataj estas la tendoj de rabistoj,
Kaj sendanĝerecon havas la incitantoj de Dio, Tiuj,
kiuj portas Dion en sia mano. 7 Vere, demandu la
brutojn, kaj ili instruos vin; La birdojn de la ĉielo, kaj
ili diros al vi; 8 Aŭ parolu kun la tero, kaj ĝi klarigos
al vi; Kaj rakontos al vi la fiŝoj de la maro. 9 Kiu ne
ekscius el ĉio ĉi tio, Ke la mano de la Eternulo tion
faris, 10 De Tiu, en kies mano estas la animo de ĉio
vivanta Kaj la spirito de ĉiu homa karno? 11 La orelo
esploras ja la parolon, Kaj la palato gustumas al si
la manĝaĵon. 12 La maljunuloj posedas saĝon, Kaj la
grandaĝuloj kompetentecon. 13 Ĉe Li estas la saĝo kaj

la forto; Ĉe Li estas konsilo kaj kompetenteco. 14 Kion
Li detruas, tio ne rekonstruiĝas; Kiun Li enŝlosos, tiu
ne liberiĝos. 15 Kiam Li digas la akvon, ĝi elsekiĝas;
Kiam Li fluigas ĝin, ĝi renversas la teron. 16 Ĉe Li estas
potenco kaj forto; Lia estas tiu, kiu eraras, kaj tiu, kiu
erarigas. 17 Li irigas konsilistojn kiel erarvagantojn,
Kaj la juĝistojn Li faras malsaĝaj. 18 La ligilojn de
reĝoj Li malligas, Kaj Li ligas per zono iliajn lumbojn.
19 Li erarvagigas la pastrojn Kaj faligas la potenculojn.
20 Li mutigas la lipojn de fidinduloj Kaj forprenas
de maljunuloj la prudenton. 21 Li verŝas honton sur
eminentulojn Kaj malfirmigas la zonon de potenculoj.
22 Li malkovras profundaĵon el meze de mallumo,
Kaj mortan ombron Li eligas en la lumon. 23 Li
grandigas naciojn kaj pereigas ilin, Disvastigas naciojn
kaj forpelas ilin. 24 Li senkuraĝigas la ĉefojn de la
popolo de la lando Kaj erarvagigas ilin en dezerto
senvoja; 25 Ili palpas en mallumo, en senlumeco; Kaj
Li ŝanceliĝigas ilin kiel ebriuloj.

**13** Ĉion ĉi tion mia okulo vidis, Mia orelo aŭdis kaj
komprenis. 2 Kion vi scias, mi ankaŭ scias; Kaj
mi ne estas malpli valora ol vi. 3 Sed mi volus paroli
kun la Plejpotenculo, Mi dezirus disputi kun Dio. 4
Tamen vi komentarias malvere, Vi ĉiuj estas senutilaj
kuracistoj. 5 Ho, se vi silentus, Tio estus saĝeco de
via flanko. 6 Aŭskultu do mian moralinstruon, Kaj
atentu la defendan parolon de mia buŝo. 7 Ĉu pro Dio
vi volas paroli malveron, Kaj pro Li paroli falsaĵon? 8
Ĉu vi volas esti personfavoraj al Li, Aŭ pro Dio vi volas
disputi? 9 Ĉu estos bone, kiam Li esploros vin? Ĉu vi
volas trompi Lin, kiel oni trompas homon? 10 Li certe
vin punos, Se vi sekrete estos personfavoraj. 11 Ĉu Lia
majesto ne konfuzas vin? Ĉu ne falas sur vin timo
antaŭ Li? 12 Viaj memorigoj estas sentencoj polvaj, Via
bastionoj estas amasoj da argilo. 13 Silentu antaŭ mi,
kaj parolos mi, Kio ajn trafos min. 14 Por kio mi portu
mian karnon en miaj dentoj Kaj metu mian animon en
mian manon? 15 Li ja mortigos min, kaj mi ne havas
esperon; Sed pri mia konduto mi volas disputi antaŭ
Li. 16 Tio jam estos savo por mi, Ĉar ne hipokritulo
venos antaŭ Lin. 17 Aŭskultu mian parolon Kaj mian
klarigon antaŭ viaj oreloj. 18 Jen mi pretigis juĝan
aferon; Mi scias, ke mi montriĝos prava. 19 Kiu povas
procesi kontraŭ mi? Tiam mi eksilentus kaj mortus.
20 Nur du aferojn ne faru al mi, Tiam mi ne kaŝos
min antaŭ Via vizaĝo: 21 Malproksimigu de mi Vian
manon, Kaj Via teruro ne timigu min. 22 Tiam voku,
kaj mi respondos; Aŭ mi parolos, kaj Vi respondu al
mi. 23 Kiom da malbonagoj kaj pekoj estas sur mi?
Sciigu al mi miajn krimojn kaj pekojn. 24 Kial Vi kaŝas
Vian vizaĝon Kaj rigardas min kiel Vian malamikon?
25 Ĉu Vi volas montri Vian forton kontraŭ deŝirita
folio? Kaj ĉu sekiĝintan pajleron Vi volas persekuti?
26 Ĉar Vi skribas kontraŭ mi maldolĉaĵon Kaj venigas
sur min la pekojn de mia juneco. 27 Vi metis miajn
piedojn en ŝtipon, Vi observas ĉiujn miajn vojojn, Kaj
Vi observas la plandojn de miaj piedoj; 28 Dum mi ja
disfalas kiel putraĵo, Kiel vesto dismanĝita de tineoj.

**14** Homo, naskita de virino, Havas mallongan vivon
kaj abundon da afliktoj. 2 Kiel floro li elkreskas
kaj velkas; Li forkuras kiel ombro kaj ne restas. 3 Kaj
kontraŭ tia Vi malfermas Viajn okulojn, Kaj min Vi
vokas al juĝo kun Vi! 4 Ĉu povas purulo deveni de
malpurulo? Neniu. 5 Se liaj tagoj estas difinitaj, la
nombro de liaj monatoj estas ĉe Vi; Vi difinis lian
limon, kiun li ne transpasos. 6 Deturnu do Vin de
li, ke li estu trankvila, Ĝis venos lia tempo, kiun
li sopiras kiel dungito. 7 Arbo havas esperon, se
ĝi estas dehakita, ke ĝi denove ŝanĝiĝos, Kaj ĝi ne
ĉesos kreskigi branĉojn. 8 Se ĝia radiko maljuniĝis
en la tero, Kaj ĝia trunko mortas en polvo, 9 Tamen,
eksentinte la odoron de akvo, ĝi denove verdiĝas,
Kaj kreskas plue, kvazaŭ ĵus plantita. 10 Sed homo
mortas kaj malaperas; Kiam la homo finiĝis, kie li
estas? 11 Forfluas la akvo el lago, Kaj rivero elĉerpiĝas
kaj elsekiĝas: 12 Tiel homo kuŝiĝas, kaj ne plu leviĝas;
Tiel longe, kiel la ĉielo ekzistas, ili ne plu vekiĝos,
Nek revigliĝos el sia dormado. 13 Ho, se Vi kaŝus
min en Ŝeol, Se Vi kaŝus min ĝis la momento, kiam
pasos Via kolero, Se Vi difinus por mi templimon
kaj poste rememorus min! (Sheol h7585) 14 Kiam homo
mortas, ĉu li poste povas reviviĝi? Dum la tuta tempo
de mia batalado mi atendus, Ĝi venos mia forŝanĝo.
15 Vi vokus, kaj mi respondus al Vi; Vi ekdezirus la
faritaĵon de Viaj manoj. 16 Nun Vi kalkulas miajn
paŝojn; Ne konservu mian pekon; 17 Sigelu en paketo
miajn malbonagojn, Kaj kovru mian kulpon. 18 Sed
monto, kiu falas, malaperas; Kaj roko forŝoviĝas de sia
loko; 19 Ŝtonojn forlavas la akvo, Kaj ĝia disverŝiĝo
fordronigas la polvon de la tero: Tiel Vi pereigas la
esperon de homo. 20 Vi premas lin ĝis fino, kaj li
foriras; Li ŝanĝas sian vizaĝon, kaj Vi forigas lin. 21 Se

liaj infanoj estas honorataj, li tion ne scias; Se ili estas
humiligataj, li tion ne rimarkas. 22 Nur lia propra
korpo lin doloras, Nur pri sia propra animo li suferas.

15 Ekparolis Elifaz, la Temanano, kaj diris: 2 Ĉu
saĝulo povas respondi per ventaj opinioj, Kaj
plenigi sian ventron per sensencaĵoj? 3 Vi disputas per
vortoj senutilaj, Kaj per paroloj, kiuj nenion helpas. 4
Vi forigas la timon, Kaj senvalorigas preĝon antaŭ
Dio. 5 Ĉar via malbonago instigas vian buŝon, Kaj vi
elektis stilon de maliculoj. 6 Vin kondamnas via buŝo,
ne mi; Kaj viaj lipoj atestas kontraŭ vi. 7 Ĉu vi naskiĝis
la unua homo? Ĉu vi estas kreita pli frue ol la altaĵoj?
8 Ĉu vi aŭdis la sekretan decidon de Dio, Kaj alkaptis
al vi la saĝon? 9 Kion vi scias tian, kion ni ne scias?
Kion vi komprenas tian, kio al ni mankas? 10 Inter
ni estas grizuloj kaj maljunuloj, Kiuj vivis pli longe
ol via patro. 11 Ĉu tiel malmulte valoras por vi la
konsoloj de Dio Kaj vorto kvieta? 12 Kial vin tiel levas
via koro, Kaj kial tiel palpebrumas viaj okuloj, 13 Ke vi
direktas kontraŭ Dion vian koleron, Kaj elirigis el via
buŝo tiajn vortojn? 14 Kio estas homo, ke li povus esti
pura Kaj ke naskito de virino povus esti prava? 15
Vidu, inter Liaj sanktuloj ne ĉiuj estas fidindaj, Kaj la
ĉielo ne estas pura en Liaj okuloj: 16 Des pli homo,
abomeninda kaj malbona, Kiu trinkas malbonagojn
kiel akvon. 17 Mi montros al vi, aŭskultu min; Kaj kion
mi vidis, tion mi rakontos, 18 Kion saĝuloj diris kaj
ne kaŝis antaŭ siaj patroj, 19 Al kiuj, al ili solaj, estis
donita la tero, Kaj fremdulo ne trairis meze de ili: 20
Dum sia tuta vivo malpiulo estas maltrankvila, Kaj la
nombro de la jaroj de tirano estas kaŝita antaŭ li; 21
Teruroj sonas en liaj oreloj; Meze de paco venas sur
lin rabisto. 22 Li ne esperas, ke li saviĝos el mallumo;
Kaj li serĉas ĉirkaŭe glavon. 23 Li vagadas, serĉante
panon; Li scias, ke preta estas en lia mano la tago
de mallumo. 24 Teruras lin mizero kaj premateco,
Venkobatas lin kiel reĝo, pretiĝinta por batalo; 25
Pro tio, ke li etendis sian manon kontraŭ Dion Kaj
kontraŭstaris al la Plejpotenculo, 26 Kuris kontraŭ
Lin kun fiera kolo, Kun dikaj dorsoj de siaj ŝildoj.
27 Li kovris sian vizaĝon per graso Kaj metis sebon
sur siajn lumbojn. 28 Li loĝas en urboj ruinigitaj, En
domoj ne loĝataj, Destinitaj esti ŝtonamasoj. 29 Li
ne restos riĉa, lia bonstato ne teniĝos, Kaj lia havaĵo
ne disvastiĝos sur la tero. 30 Li ne forkliniĝos de
mallumo; Flamo velksekigos liajn branĉojn, Kaj Li
forigos lin per la blovo de Sia buŝo. 31 La erarinto
ne fidu vantaĵon, Ĉar vanta estos lia rekompenco. 32
Antaŭtempe li finiĝos, Kaj lia branĉo ne estos verda. 33
Lia nematura bero estos deŝirita, kiel ĉe vinbertrunko;
Kaj lia floro defalos, kiel ĉe olivarbo. 34 Ĉar la anaro
de la hipokrituloj senhomiĝos; Kaj fajro ekstermos la
tendojn de tiuj, kiuj prenas subaĉeton. 35 Ili gravediĝis
per malpiaĵo kaj naskis pekon, Kaj ilia ventro pretigas
malicaĵon.

16 Ijob respondis kaj diris: 2 Mi aŭdis multe da
similaj aferoj; Tedaj konsolantoj vi ĉiuj estas. 3
Ĉu estos fino al la ventaj vortoj? Kaj kio vin incitis,
ke vi tiel parolas? 4 Mi ankaŭ povus paroli, kiel vi.
Se vi estus sur mia loko, Mi konsolus vin per vortoj
Kaj balancus pri vi mian kapon. 5 Mi fortigus vin
per mia buŝo Kaj konsolus vin per paroloj de miaj
lipoj. 6 Se mi parolos, mia doloro ne kvietiĝos; Se
mi ĉesos, kio foriros de mi? 7 Sed nun Li lacigis
min, Li detruis mian tutan esencon. 8 Vi faris al mi
sulkojn, tio fariĝis atesto; Mia senfortiĝo staras antaŭ
mia vizaĝo, kaj parolas. 9 Lia kolero disŝiras; Mia
malamanto grincigas kontraŭ mi siajn dentojn; Mia
premanto briligas kontraŭ mi siajn okulojn. 10 Ili
malfermegis kontraŭ mi sian buŝon, insulte batas
min sur la vangojn; Ĉiuj kune kontentigis sur mi sian
koleron. 11 Dio transdonis min al maljustulo, Ĵetis min
en la manojn de malbonuloj. 12 Mi estis trankvila;
sed Li frakasis min, Li kaptis min je la kolo, disbatis
min, Kaj Li faris min por Si celo. 13 Liaj pafistoj
min ĉirkaŭis; Li dishakas miajn internaĵojn kaj ne
kompatas, Li elverŝas sur la teron mian galon. 14 Li
faras en mi breĉon post breĉo, Li kuras kontraŭ min
kiel batalisto. 15 Sakaĵon mi kudris sur mian korpon,
Kaj en polvo mi kaŝis mian kornon. 16 Mia vizaĝo
ŝvelis de plorado, Kaj sur miaj palpebroj estas morta
ombro; 17 Kvankam ne troviĝas perfortaĵo en miaj
manoj, Kaj mia preĝo estas pura. 18 Ho tero, ne kovru
mian sangon, Kaj mia kriado ne trovu haltejon. 19
Vidu, en la ĉielo estas mia atestanto, Kaj mia konanto
estas en la altaj sferoj. 20 Parolistoj estas por mi miaj
amikoj; Sed mia okulo larmas al Dio, 21 Ke Li decidu
inter homo kaj Dio, Inter homo kaj lia amiko. 22 Ĉar
la nombro de la jaroj pasos, Kaj mi iros sur vojon
nerevenеblan.

17 Mia spirito senfortiĝis, miaj tagoj mallongiĝis,
Tomboj estas antaŭ mi. 2 Mokado min ĉirkaŭas;

En aflikto pro tio restas mia okulo. 3 Estu Vi mem mia
garantianto antaŭ Vi; Alie kiu donos la manon pro
mi? 4 Ĉar ilian koron Vi kovris kontraŭ prudento;
Tial Vi ne donos al ili triumfon. 5 Se iu fanfaronas
antaŭ siaj amikoj pri sia parto, La okuloj de liaj infanoj
konsumiĝos. 6 Li faris min proverbo por la popoloj;
Kaj mi fariĝis homo, al kiu oni kraĉas en la vizaĝon.
7 Mia okulo mallumiĝis de ĉagreno, Kaj ĉiuj miaj
membroj fariĝis kiel ombro. 8 La justuloj eksentos
teruron pro tio, Kaj la senkulpulo ekscitiĝos kontraŭ
la hipokritulo. 9 Tamen la virtulo forte konservos
sian vojon, Kaj la purmanulo pli firmiĝos. 10 Kaj kiom
ajn vi ĉiuj revenos, Mi ne trovos inter vi saĝulon. 11
Miaj tagoj forpasis, pereis miaj intencoj, Kiujn havis
mia koro. 12 La nokton ili volas fari tago, La lumon
alproksimigi al la mallumo. 13 Se mi atendas, tamen
Ŝeol estas mia domo, En la mallumo estas pretigita
mia lito. (Sheol h7585) 14 Al la kavo mi diras: Vi estas
mia patro; La vermojn mi nomas mia patrino kaj mia
fratino. 15 Kion mi devas atendi? Kiu atentos mian
esperon? 16 En la profundon de Ŝeol ĝi malsupreniros,
Ni ambaŭ kune kuŝos en la polvo. (Sheol h7585)

18 Ekparolis Bildad, la Ŝuĥano, kaj diris: 2 Kiam
vi ĉesos ĵetadi vortojn? Pripensu, kaj poste ni
parolos. 3 Kial ni estu rigardataj kiel brutoj, Kaj ni
estu malpuruloj en viaj okuloj? 4 Ho vi, kiu disŝiras
sian animon en sia kolero, Ĉu por vi estu forlasata la
tero, Kaj roko forŝoviĝu de sia loko? 5 La lumo de la
malpiulo estingiĝos, Kaj ne brilos la flamo de lia fajro.
6 La lumo mallumiĝos en lia tendo, Kaj lia lucerno
super li estingiĝos. 7 Mallongiĝos liaj fortaj paŝoj, Kaj
lia propra intenco lin faligos. 8 Ĉar li trafis per siaj
piedoj en reton, Kaj li moviĝas en kaptilo. 9 La maŝo
enkroĉigos lian kalkanon, Kaj pereo lin atakos. 10
Kaŝita en la tero estas lia falilo, Kaj kaptiloj kontraŭ li
estas sur la vojo. 11 De ĉiuj flankoj timigos lin teruroj
Kaj atakos liajn piedojn. 12 Malsato konsumos lian
forton, Kaj pereo estas preparita por liaj flankoj. 13
Konsumiĝos la membroj de lia korpo, Liajn membrojn
konsumos la unuenaskito de la morto. 14 Lia espero
estos elŝirita el lia tendo, Kaj ĝi pelos lin al la reĝo de
teruroj. 15 Nenio restos en lia tendo; Sur lian loĝejon
ŝutiĝos sulfuro. 16 Malsupre sekiĝos liaj radikoj, Kaj
supre detranĉiĝos liaj branĉoj. 17 La memoro pri li
malaperos de sur la tero, Kaj sur la stratoj li ne havos
nomon. 18 Li estos elpelita el lumo en mallumon, Kaj
el la mondo li estos elpuŝita. 19 Nek filon nek nepon
li havos en sia popolo, Kaj neniu restos ĉe li en lia
loĝloko. 20 La posteuloj sentos teruron pri lia tago,
Kaj la antaŭulojn kaptos timo. 21 Tia estas la loĝejo de
maljustulo, Kaj tia estas la loko de tiu, kiu ne konas
Dion.

19 Ijob respondis kaj diris: 2 Ĝis kiam vi afliktados
mian animon Kaj turmentados min per paroloj?
3 Jen jam dek fojojn vi malhonoras min; Vi ne hontas
premi min. 4 Se mi efektive eraris, Mia eraro restos ĉe
mi. 5 Se efektive vi volas montri vin pli grandaj ol
mi, Kaj vi riproĉas al mi hontindaĵon, 6 Tiam sciu, ke
Dio faris al mi maljustaĵon, Kaj ĉirkaŭis min per Sia
reto. 7 Jen mi krias pri maljusteco, sed mi ne ricevas
respondon; Mi vokas, sed mi ne ricevas juĝon. 8 Mian
vojon Li baris, ke mi ne povas transiri, Kaj sur mian
irejon Li metis mallumon. 9 Mian honoron Li detiris
de mi, Kaj deprenis la kronon de mia kapo. 10 Li
disbatis min ĉirkaŭe tiel, ke mi pereas; Mian esperon
Li elŝiris kiel arbon. 11 Ekflamis kontraŭ mi Lia kolero,
Kaj Li rigardas min kiel Lian malamikon. 12 Kune venis
Liaj taĉmentoj, kaj ebenigis kontraŭ mi sian vojon Kaj
stariĝis sieĝe ĉirkaŭ mia tendo. 13 Miajn fratojn Li
malproksimigis de mi, Kaj miaj konatoj forfremdiĝis
de mi. 14 Miaj parencoj fortiriĝis, Kaj miaj konantoj
forgesis min. 15 La loĝantoj de mia domo kaj miaj
servistinoj rigardas min kiel fremdulon; En iliaj okuloj
mi fariĝis aligentulo. 16 Mian sklavon mi vokas, kaj li
ne respondas; Per mia buŝo mi devas petegi lin. 17
Mia spiro fariĝis abomenata por mia edzino, Kaj mia
petado por la filoj de mia ventro. 18 Eĉ la malgrandaj
infanoj malestimas min; Kiam mi leviĝas, ili parolas
kontraŭ mi. 19 Abomenas min ĉiuj miaj intimuloj; Kaj
tiuj, kiujn mi amis, turnis sin kontraŭ mi. 20 Kun mia
haŭto kaj kun mia karno kunkreskis miaj ostoj, Mi
restis nur kun haŭto sur miaj dentoj. 21 Kompatu
min, kompatu min, miaj amikoj; Ĉar la mano de Dio
frapis min. 22 Kial vi persekutas min, kiel Dio, Kaj
ne povas satiĝi de mia karno? 23 Ho, se miaj vortoj
estus enskribitaj, Ho, se ili estus gravuritaj en libro,
24 Per fera skribilo kun plumbo, Gravuritaj por eterne
sur roko! 25 Sed mi scias, ke mia Liberigonto vivas,
Kaj fine Li leviĝos super la polvo. 26 Kaj post kiam
mia haŭto estos tiel detruita Kaj mi estos senkorpa,
mi vidos Dion; 27 Lin vidos mi, kaj miaj okuloj vidos,
ne fremdaj; Pri tio sopiregas mia interno en mia

brusto. 28 Se vi diros: Kiel ni lin persekutu, Kaj ni
trovu kontraŭ li la radikon de la afero, 29 Tiam timu
glavon; Ĉar furioza estas la glavo kontraŭ malbonagoj,
Por ke vi sciu, ke ekzistas juĝo.

**20** Ekparolis Cofar, la Naamano, kaj diris: 2 Pro
tio miaj pensoj devigas min respondi, Pro tio,
kion mi sentas. 3 Hontindan riproĉon mi aŭdis, Kaj
la spirito de mia prudento respondos por mi. 4 Ĉu
vi scias, ke tiel estis de eterne, De post la apero de
homo sur la tero, 5 Ke la triumfado de malvirtuloj
estas mallongatempa, Kaj la ĝojo de hipokritulo estas
nur momenta? 6 Se lia grandeco eĉ atingus ĝis la
ĉielo, Kaj lia kapo tuŝus la nubon, 7 Li tamen pereos
por ĉiam, kiel lia sterko; Tiuj, kiuj lin vidis, diros:
Kie li estas? 8 Kiel sonĝo li forflugos, kaj oni lin
ne trovos; Li malaperos, kiel nokta vizio. 9 Okulo,
kiu rigardis lin, ne plu vidos lin; Lia loko lin ne plu
vidos. 10 Liaj filoj kurados almozpetante, Kaj liaj
manoj redonos lian havaĵon. 11 Liaj ostoj estos punitaj
pro la pekoj de lia juneco, Kaj tio kuŝiĝos kune kun
li en la polvo. 12 Se la malbono estas dolĉa en lia
buŝo, Li kaŝas ĝin sub sia lango, 13 Li flegas ĝin kaj ne
forlasas ĝin, Kaj retenas ĝin sur sia palato: 14 Tiam
lia manĝaĵo renversiĝos en liaj internaĵoj, Fariĝos
galo de aspidoj interne de li. 15 Li englutis havaĵon,
sed li ĝin elvomos; El lia ventro Dio ĝin elpelos. 16
Venenon de aspidoj li suĉos; Lango de vipuro lin
mortigos. 17 Li ne vidos fluojn nek riverojn, Torentojn
de mielo kaj de butero. 18 Li redonos tion, kion li
pene akiris, kaj li tion ne englutos; Kiel ajn granda
estas lia havaĵo, li ĝin fordonos kaj ne ĝuos ĝin. 19
Ĉar li premis kaj forlasis la senhavulojn, Li rabis al si
domon, kiun li ne konstruis. 20 Ĉar lia interno ne estis
trankvila, Tial li ne savos tion, kio estis por li kara.
21 Nenion restigis lia manĝemeco; Tial lia bonstato
ne estos longedaŭra. 22 Malgraŭ lia abundeco, li
estos premata; Ĉiaspecaj suferoj trafos lin. 23 Por
plenigi lian ventron, Li sendos sur lin la flamon de
Sia kolero, Kaj pluvigos sur lin Sian furiozon. 24 Se li
forkuros de batalilo fera, Trafos lin pafarko kupra.
25 Nudigita glavo trairos lian korpon, Kaj la fulmo
de lia turmentilo venos sur lin kun teruro. 26 Nenia
mallumo povos kaŝi liajn trezorojn; Lin konsumos
fajro ne disblovata; Malbone estos al tiu, kiu restos en
lia tendo. 27 La ĉielo malkovros liajn malbonagojn,
Kaj la tero leviĝos kontraŭ lin. 28 Malaperos la greno
el lia domo, Disŝutita ĝi estos en la tago de Lia kolero.
29 Tia estas de Dio la sorto de homo malpia, Kaj la
heredaĵo destinita por li de Dio.

**21** Ijob respondis kaj diris: 2 Aŭskultu mian parolon;
Kaj ĝi estu anstataŭ viaj konsoloj. 3 Toleru, ke
mi parolu; Kaj kiam mi finos mian paroladon, tiam
moku. 4 Ĉu kontraŭ homo mi disputas? Kaj kial mi ne
estu malpacienca? 5 Turnu vin al mi, kaj vi eksentos
teruron, Kaj vi metos la manon sur la buŝon. 6 Kiam
mi ekpensas pri tio, min atakas teruro, Kaj tremo
kaptas mian korpon. 7 Kial malpiuloj vivas, Atingas
maljunecon, akiras grandan havaĵon? 8 Ilia idaro
estas bone aranĝita antaŭ ili, kune kun ili, Kaj ilia
devenantaro estas antaŭ iliaj okuloj. 9 Iliaj domoj
estas en paco, sen timo; Kaj la vergo de Dio ne estas
sur ili. 10 Ilia bovo naskigas kaj ne estas forpuŝata; Ilia
bovino gravediĝas kaj ne abortas. 11 Siajn malgrandajn
infanojn ili eligas kiel ŝafaron, Kaj iliaj knaboj saltas.
12 Ili ĝojkrias sub la sonoj de tamburino kaj harpo, Ili
estas gajaj sub la sonoj de fluto. 13 Ili pasigas siajn
tagojn en bonstato, Kaj iras en Ŝeolon momente. (Sheol
h7585) 14 Kaj tamen ili diras al Dio: Foriru de ni, Ni ne
deziras koni Viajn vojojn; 15 Kio estas la Plejpotenculo,
ke ni servu al Li? Kaj kian utilon ni havos, se ni turnos
nin al Li? 16 Sed ne de ili dependas ilia bonstato; La
pensmaniero de la malpiuloj estas malproksima de
mi. 17 Ĝis kiam? La lumilo de la malpiuloj estingiĝu,
Kaj ilia pereo venu sur ilin; Suferojn Li partodonu al ili
en Sia kolero. 18 Ili estu kiel pajlero antaŭ vento, Kaj
kiel grenventumaĵo, kiun forportas ventego. 19 Dio
konservas lian malfeliĉon por liaj infanoj; Li repagu
al li mem, ke li sciu; 20 Liaj propraj okuloj vidu lian
malfeliĉon, Kaj el la kolero de la Plejpotenculo li
trinku. 21 Ĉar kiom interesas lin lia domo post li,
Kiam la nombro de liaj monatoj finiĝis? 22 Ĉu oni
povas instrui scion al Dio, Kiu juĝas ja plej altajn? 23
Unu mortas meze de sia abundeco, Tute trankvila kaj
kontenta; 24 Lia brusto estas plena de lakto, Kaj liaj
ostoj estas saturitaj de medolo. 25 Alia mortas kun
animo suferanta, Kaj li ne ĝuis bonon. 26 Sed ambaŭ
kune ili kuŝas en la tero, Kaj vermoj ilin kovras. 27
Vidu, mi scias viajn pensojn, Kaj la argumentojn, kiujn
vi malice kolektas kontraŭ mi; 28 Vi diros: Kie estas
la domo de la nobelo? Kaj kie estas la tendo, en kiu
loĝis la malpiuloj? 29 Sed demandu la vojaĝantojn, Kaj
ne malatentu iliajn atestojn: 30 En tago de malfeliĉo

la malpiulo estas ŝirmata, En tago de kolero li estas
metata flanken. 31 Kiu montros antaŭ lia vizaĝo lian
konduton? Kiu repagos al li, se li ion faris? 32 Kaj
li estas akompanata al la tomboj, Kaj sur la tomba
altaĵeto estas starigataj gardistoj. 33 Dolĉaj estas por li
la terbuloj de la valo, Kaj post li treniĝas ĉiuj homoj,
Kaj sennombraj estas tiuj, kiuj iris antaŭ li. 34 Kiel do
vi volas konsoli min per vantaĵo, Kaj viaj respondoj
enhavas nur malĝustaĵojn?

22 Ekparolis Elifaz, la Temanano, kaj diris: 2 Ĉu
Dion povas instrui homo? Ĉu povas Lin instrui
eĉ saĝulo? 3 Ĉu por la Plejpotenculo tio estas utila, se
vi estas virta? Kaj ĉu Li havas profiton de tio, se via
konduto estas pia? 4 Ĉu pro timo antaŭ vi Li disputos
kun vi, Iros kun vi al juĝo? 5 Via malvirteco estas
ja granda, Kaj viaj malbonagoj ne havas finon. 6 Vi
prenis de viaj fratoj garantiaĵon vane, De preskaŭ-
nuduloj vi deprenis la vestojn; 7 Al laculo vi ne
donis akvon por trinki, Kaj al malsatulo vi rifuzis
panon; 8 Per forta brako vi akiris teron, Kaj dank' al
eminenteco vi loĝis sur ĝi; 9 Vidvinojn vi foririgis
kun nenio, Kaj la brakojn de orfoj vi frakasis. 10
Pro tio ĉirkaŭe de vi estas kaptiloj, Kaj subita teruro
vin timigas. 11 Aŭ pro mallumo vi nenion vidas, Kaj
multego da akvo vin kovris? 12 Ĉu ne estas Dio tie
alte en la ĉielo? Rigardu la stelojn, kiel alte ili estas.
13 Kaj vi diras: Kion scias Dio? Ĉu Li povas juĝi en
mallumo? 14 La nuboj kovras Lin, kaj Li ne vidas;
Kaj Li nur rondiras en la rondo de la ĉielo. 15 Ĉu
vi konservas la vojon antikvan, Kiun iradis homoj
malpiaj, 16 Kiuj estis kaptitaj antaŭtempe, Kaj kies
grundo disverŝiĝis kiel rivero, 17 Kiuj parolis al Dio:
Foriru de ni! Kion povas fari al ni la Plejpotenculo? 18
Kvankam Li plenigis iliajn domojn per bonaĵo. Sed la
pensmaniero de malvirtuloj estas malproksima de mi.
19 La virtuloj vidos kaj ĝojos; La senkulpulo mokos
ilin: 20 Certe malaperis nia kontraŭulo, Kaj kio restis,
tion ekstermis fajro. 21 Interkonsentu do kun Li, kaj
vi havos pacon; Per tio venos al vi bono. 22 Prenu
el Lia buŝo instruon, Kaj metu Liajn vortojn en vian
koron. 23 Se vi revenos al la Plejpotenculo, vi estos
konstruita; Forigu malpiaĵon el via tendo. 24 Ĵetu en
la polvon la multekostan metalon, Kaj la Ofiran oron
sur la ŝtonojn de la torentoj; 25 Tiam la Plejpotenculo
estos via oro kaj via brilanta arĝento; 26 Ĉar tiam
vi havos vian plezuron en la Plejpotenculo, Kaj vi
levos al Dio vian vizaĝon; 27 Vi preĝos al Li, kaj Li vin
aŭskultos; Kaj viajn sanktajn promesojn vi plenumos;
28 Se vi ion decidos, ĝi plenumiĝos ĉe vi; Kaj super
viaj vojoj brilos lumo. 29 Ĉar tiujn, kiuj humiliĝis, Li
altigos; Kaj kiu mallevas la okulojn, tiu estos savita. 30
Ankaŭ tiun, kiu ne estis senkulpa, Li savos; Tia estos
savita pro la pureco de viaj manoj.

23 Ijob respondis kaj diris: 2 Eĉ hodiaŭ mia parolado
restas maldolĉa; Mia suferado estas pli peza, ol
miaj ĝemoj. 3 Ho, se mi scius, kiamaniere mi povas
Lin trovi, Veni al Lia trono! 4 Mi prezentus al Li juĝan
aferon, Kaj mian buŝon mi plenigus per argumentoj.
5 Mi ekscius la vortojn, kiujn Li respondus al mi; Mi
komprenus, kion Li dirus al mi. 6 Ĉu en la grandeco
de Sia forto Li luktus kontraŭ mi? Ne, Li nur atentu
min; 7 Tiam pravulo procesus kun Li, Kaj mi liberiĝus
por ĉiam de mia Juĝanto. 8 Sed jen mi iras antaŭen,
kaj Li tie ne estas; Mi iras malantaŭen, kaj mi Lin
ne rimarkas; 9 Se Li faras ion maldekstre, mi Lin ne
trovas; Se Li kaŝas Sin dekstre, mi Lin ne vidas. 10 Sed
mian vojon Li konas; Se Li min elprovos, mi eliros kiel
oro. 11 Sur Lia irejo forte teniĝas mia piedo; Lian vojon
mi konservis, kaj ne forkliniĝis. 12 Mi ne deturnas
min de la ordonoj de Liaj lipoj; Pli ol mian propran
leĝon mi konservis la dirojn de Lia buŝo. 13 Sed Li
estas sola: kiu kontraŭstaros al Li? Kion Lia animo
deziras, tion Li faras. 14 Kio estas destinita por mi,
tion Li plenumos; Kaj Li havas multe da similaj aferoj.
15 Tial mi tremas antaŭ Lia vizaĝo, Mi primeditas,
kaj mi timas Lin. 16 Dio senkuraĝigis mian koron,
Kaj la Plejpotenculo min konfuzis. 17 Ĉar mi ne estas
neniigita antaŭ la mallumo, Kaj antaŭ mia vizaĝo Li
ne kovris la mallumon.

24 Kial la Plejpotenculo ne destinis tempojn, Kaj Liaj
konantoj ne vidas Liajn tagojn? 2 Oni forŝovas
la limojn; Oni rabas la ŝafaron kaj paŝtas ĝin. 3
Oni forkondukas la azenon de orfoj, Oni prenas kiel
garantiaĵon la bovon de vidvino. 4 Oni forpuŝas
malriĉulojn de la vojo; La suferantoj sur la tero devas
sin kaŝi. 5 Jen kiel sovaĝaj azenoj ili eliras al sia
laboro, por serĉi kaptaĵon; La stepo donas al ili panon
por iliaj infanoj. 6 Sur fremda kampo ili rikoltas, Kaj
en vinberĝardeno de malpiulo ili kolektas berojn.
7 Nudaj ili tradormas la nokton, ĉar ili ne havas
veston, Kaj dum la frosto ili havas nenion, por sin
kovri. 8 De la pluvego de la montoj ili malsekiĝas,
Kaj pro nehavado de rifuĝejo ili ĉirkaŭprenas rokon.

9 Oni forŝiras orfon de la mamoj, Kaj oni ruinigas
malriĉulon. 10 Ili iras nudaj, sen vestoj, Kaj malsataj ili
portas garbojn; 11 Inter iliaj muroj oni pretigas oleon;
Oni devigas ilin treti en vinpremejoj, dum ili mem
estas soifantaj. 12 El la urbo aŭdiĝas ĝemoj de homoj,
Kaj la animoj de mortigatoj krias; Sed Dio ne atentas
tiun blasfemadon. 13 Tiuj homoj estas kontraŭuloj de
la lumo; Ili ne konas Liajn vojojn, Ne revenas al Lia
irejo. 14 Antaŭ tagiĝo leviĝas la mortigisto, Mortigas
malriĉulon kaj senhavulon, Kaj en la nokto li estas kiel
ŝtelisto. 15 La okulo de adultulo atendas la krepuskon,
Dirante: Neniu okulo min vidu; Kaj li kovras sian
vizaĝon. 16 En mallumo oni faras subfoson sub domoj;
Dum la tago oni kaŝas sin ĉe si, ne konante lumon.
17 Ĉar la mallumo estas mateno por ili ĉiuj, Ĉar ili
interkonatiĝis kun la teruroj de la mallumo. 18 Tia
homo estas malpeza sur la supraĵo de akvo; Malgranda
estas lia parto sur la tero; Li ne iras laŭ la vojo de
vinberĝardenoj. 19 Kiel seka tero kaj varmego englutas
neĝan akvon, Tiel Ŝeol englutas la pekulojn. (Sheol h7585)
20 Forgesu lin la interno de lia patrino; La vermoj
frandu lin; Oni lin ne plu rememoru; Li rompiĝu kiel
malbona arbo — 21 Li, kiu premas seninfanulinon, kiu
ne naskis, Kaj kiu ne faras bonon al vidvino. 22 Kiu eĉ
potenculojn maltrankviligas per sia forto, Tiel ke oni
ne estas certa pri sia vivo, kiam li leviĝis. 23 Dio donas
al ili sendanĝerecon kaj apogon, Kaj Liaj okuloj estas
super iliaj vojoj. 24 Ili leviĝis alte; sed subite ili ne plu
ekzistas; Ili falas kaj estas forkaptataj kiel ĉiuj, Kaj
kiel la kapo de spiko ili dehakiĝas. 25 Ĉu ne estas tiel?
Kiu pruvos, ke mi mensogas, kaj senvalorigos mian
parolon?

25 Ekparolis Bildad, la Ŝuĥano, kaj diris: 2 Regado
kaj timigo estas ĉe Li, Kiu faras pacon en Siaj
altaj sferoj. 3 Ĉu oni povas kalkuli Liajn taĉmentojn?
Kaj super kiu ne leviĝas Lia lumo? 4 Kiel povas homo
esti prava antaŭ Dio? Kaj kiel naskito de virino povas
esti pura? 5 Vidu, eĉ la luno ne estas hela Kaj la steloj
ne estas puraj antaŭ Liaj okuloj: 6 Des pli homo, la
vermo! Kaj homido, la tineo!

26 Ijob respondis kaj diris: 2 Kiel vi helpas al tiu,
kiu ne havas forton! Kiel vi subtenas tiun, kies
brako estas senforta! 3 Kian konsilon vi donas al tiu,
kiu ne havas saĝon, Kaj kiel grandan prudenton vi
montras! 4 Al kiu vi parolas vortojn? Kaj kies spirito
eliras el vi? 5 La mortintoj tremas sub la akvo, Kaj
ankaŭ tiuj, kiuj vivas en ĝi. 6 Ŝeol estas malkovrita
antaŭ Li, Kaj la abismo ne havas kovron. (Sheol h7585) 7
Li etendis la nordon super la malpleno, Li pendigis
la teron sur nenio. 8 Li ligas la akvon en Siaj nuboj,
Kaj nubo ne krevas sub tio. 9 Li kovras la tronon Kaj
etendas ĉirkaŭ ĝi Sian nubon. 10 Li faris limon sur la
akvo, Ĝis la loko, kie finiĝas la lumo kaj la mallumo.
11 La kolonoj de la ĉielo ŝanceliĝas Kaj tremas de Lia
krio. 12 Per Sia forto Li kvietigas la maron, Kaj per Sia
saĝo Li frakasas Rahabon. 13 Per Lia spirito belegiĝis
la ĉielo; Lia mano trapikas la tordiĝantan serpenton.
14 Jen tio estas parto de Liaj vojoj; Kaj nur iometon ni
aŭdis pri Li. Kiu povas kompreni la tondron de Lia
potenco?

27 Kaj Ijob daŭrigis siajn sentencojn, kaj diris: 2 Kiel
vivas Dio, kiu rifuzis al mi miajn rajtojn, Kaj la
Plejpotenculo, kiu afliktas mian animon: 3 Tiel longe,
kiel mia animo estas en mi Kaj la spiro de Dio en mia
nazo, 4 Miaj lipoj ne eldiros malĝustaĵon, Kaj mia
lango ne diros malveraĵon. 5 Malproksime estas de mi,
Rigardi vin kiel pravajn; Ĝis mia morto mi ne ĉesos
rigardi min kiel senkulpan. 6 Mian pravecon mi tenas
forte, kaj mi ne ellasos ĝin; Dum mia tuta vivo mia
koro ne faros al mi riproĉon pri tio. 7 Mia malamiko
estu rigardata kiel malvirtulo, Kaj mia kontraŭulo kiel
malpiulo. 8 Ĉar kio estas la espero de hipokritulo,
Kiam Dio faras al li finon, elŝiras lian animon? 9 Ĉu lian
kriadon Dio aŭskultos, Kiam trafos lin malfeliĉo? 10 Ĉu
li povas havi ĝuon de la Plejpotenculo, Voki al Dio en
ĉiu tempo? 11 Mi instruos vin pri la mano de Dio; Mi
ne kaŝos antaŭ vi tion, kio estas ĉe la Plejpotenculo. 12
Jen vi ĉiuj mem vidis; Kial do vi parolas senenhavaĵon?
13 Tia estas la sorto de malbona homo ĉe Dio, Kaj la
parto, kiun tiranoj ricevas de la Plejpotenculo: 14 Se
li havos multe da filoj, ili iros sub la glavon; Kaj lia
devenantaro ne havos sate panon. 15 Tiujn, kiuj restos
ĉe li, enterigos la morto; Kaj liaj vidvinoj ne ploros. 16
Se li kolektos arĝenton kiel polvon Kaj pretigos al si
vestojn kiel argilon, 17 Tiam li pretigos, sed justulo
metos sur sin la vestojn, Kaj senkulpulo dividos la
arĝenton. 18 Li konstruas sian domon kiel tineo, Kaj
kiel gardisto, kiu faras al si laŭbon. 19 Li kuŝiĝas riĉa,
kaj nenion kunportas; Li malfermas la okulojn, kaj
jam nenio ekzistas. 20 Teruro superfalos lin kiel akvo;
En la nokto forportos lin ventego. 21 Levos lin vento
orienta, kaj foriros, Kaj forblovos lin de lia loko. 22 Li

tion ĵetos sur lin senkompate; De Lia mano li kuros
kaj kuros. 23 Oni kunfrapos pri li la manojn, Kaj oni
fajfos pri li sur lia loko.

28 La arĝento havas lokon, kie oni ĝin elakiras; Kaj
la oro havas lokon, kie oni ĝin fandas. 2 La fero
estas ricevata el polvo, Kaj el ŝtono oni fandas la
kupron. 3 Oni faras finon al la mallumo, Kaj rezulte
oni trovas la ŝtonojn el grandega mallumo. 4 Oni fosas
kavon tie, kie oni loĝas; Kaj tie, kie paŝas neniu piedo,
ili laboras pendante, forgesitaj de homoj. 5 La tero, el
kiu devenas pano, Estas trafosata sube kvazaŭ per
fajro. 6 Ĝiaj ŝtonoj estas loko de safiroj, Kaj terbuloj
enhavas oron. 7 La vojon ne konas rabobirdo, Kaj la
okulo de falko ĝin ne vidis. 8 Ne paŝis sur ĝi sovaĝaj
bestoj, Ne iris sur ĝi leono. 9 Sur rokon oni metas
sian manon, Oni renversas montojn de ilia bazo. 10 En
rokoj oni elhakas riverojn, Kaj ĉion grandvaloran vidis
la okulo de homo. 11 Oni haltigas la fluon de riveroj,
Kaj kaŝitaĵon oni eltiras al la lumo. 12 Sed kie oni
trovas la saĝon? Kaj kie estas la loko de prudento? 13
La homo ne scias ĝian prezon; Kaj ĝi ne estas trovata
sur la tero de vivantoj. 14 La abismo diras: Ne en mi
ĝi estas; La maro diras: Ĝi ne troviĝas ĉe mi. 15 Oni
ne povas doni por ĝi plej bonan oron, Oni ne pesas
arĝenton page por ĝi. 16 Oni ne taksas ĝin per oro
Ofira, Nek per multekosta onikso kaj safiro. 17 Ne
valoregalas al ĝi oro kaj vitro; Kaj oni ne povas ŝanĝi
ĝin kontraŭ vazoj el pura oro. 18 Koraloj kaj kristalo
ne estas atentataj; Kaj posedo de saĝo estas pli valora
ol perloj. 19 Ne valoregalas al ĝi topazo el Etiopujo;
Pura oro ne povas esti ĝia prezo. 20 De kie venas la
saĝo? Kaj kie estas la loko de prudento? 21 Kaŝita
ĝi estas antaŭ la okuloj de ĉio vivanta, Nevidebla
por la birdoj de la ĉielo. 22 La abismo kaj la morto
diras: Per niaj oreloj ni aŭdis nur famon pri ĝi. 23 Dio
komprenas ĝian vojon, Kaj Li scias ĝian lokon; 24 Ĉar
Li rigardas ĝis la fino de la tero, Li vidas sub la tuta
ĉielo. 25 Kiam Li donis pezon al la vento Kaj aranĝis
la akvon laŭmezure, 26 Kiam Li starigis leĝon por la
pluvo Kaj vojon por la fulmo kaj tondro: 27 Tiam Li
vidis ĝin kaj anoncis ĝin, Pretigis ĝin kaj esploris ĝin;
28 Kaj Li diris al la homoj: Vidu, timo antaŭ Dio estas
saĝo, Kaj evitado de malbono estas prudento.

29 Kaj plue Ijob parolis siajn sentencojn, kaj diris: 2
Ho, se estus al mi tiel, kiel en la antaŭaj monatoj,
Kiel en la tempo, kiam Dio min gardis; 3 Kiam Lia
lumilo lumis super mia kapo; Kaj sub Lia lumo mi
povis iri en mallumo; 4 Kiel estis al mi en la tagoj
de mia juneco, Kiam la ŝirmado de Dio estis super
mia tendo; 5 Kiam la Plejpotenculo estis ankoraŭ
kun mi, Kaj ĉirkaŭ mi estis miaj infanoj; 6 Kiam miaj
paŝoj laviĝadis en butero, Kaj la roko verŝadis al mi
fluojn da oleo! 7 Kiam mi eliris el la pordego al la
urbo Kaj aranĝis al mi sidon sur la placo, 8 Vidis min
junuloj kaj kaŝis sin, Kaj maljunuloj leviĝis kaj staris;
9 Eminentuloj ĉesis paroli Kaj metis la manon sur sian
buŝon; 10 La voĉo de altranguloj sin kaŝis, Kaj ilia
lango algluiĝis al ilia palato. 11 Kiam orelo aŭdis, ĝi
nomis min feliĉa; Kiam okulo vidis, ĝi gloris min; 12
Ĉar mi savadis kriantan malriĉulon, Kaj orfon, kiu
ne havis helpanton. 13 Beno de pereanto venadis sur
min, Kaj la koro de vidvino estis ĝojigata de mi. 14
Virteco estis mia vesto, Kaj mia justeco vestis min
kiel mantelo kaj kapornamo. 15 Mi estis okuloj por la
blindulo, Kaj piedoj por la lamulo; 16 Mi estis patro por
la malriĉuloj, Kaj juĝan aferon de homoj nekonataj mi
esploradis; 17 Mi rompadis la makzelojn al maljustulo,
Kaj el liaj dentoj mi elŝiradis la kaptitaĵon. 18 Kaj mi
pensis: En mia nesto mi mortos, Kaj grandnombraj kiel
sablo estos miaj tagoj; 19 Mia radiko estas malkovrita
por la akvo, Kaj roso noktas sur miaj branĉoj. 20 Mia
gloro estas ĉiam nova, Kaj mia pafarko ĉiam refortiĝas
en mia mano. 21 Oni aŭskultadis min kaj atendadis,
Kaj silentadis, kiam mi donadis konsilojn. 22 Post
miaj vortoj oni ne plu parolis; Kaj miaj vortoj gutadis
sur ilin. 23 Oni atendadis min kiel la pluvon, Kaj
malfermadis sian buŝon, kiel por malfrua pluvo. 24 Se
mi iam ridis al ili, ili ne kredis tion; Kaj la lumo de
mia vizaĝo ne falis. 25 Kiam mi iris al ili, mi sidis sur
la ĉefa loko; Mi loĝis kiel reĝo inter taĉmentoj, Kiel
konsolanto de funebruloj.

30 Sed nun ridas pri mi homoj pli junaj ol mi, Kies
patrojn mi ne volus starigi kun la hundoj de miaj
ŝafaroj; 2 Kies forto de la manoj estis senbezona por
mi, Kaj kiuj ne povis atingi maljunecon; 3 Kiuj pro
malriĉeco kaj malsato solece kuris En la dezerton
mizeran kaj senvivan; 4 Kiuj elŝiras atriplon apud la
arbetaĵoj, Kaj kies pano estas la radiko de genisto.
5 El meze de la homoj oni elpelas ilin; Oni krias sur
ilin, kiel sur ŝteliston; 6 En terfendoj ĉe la valoj
ili loĝas, En truoj de la tero kaj de rokoj; 7 Inter
la arbetaĵoj ili krias, Sub la kardoj ili kolektiĝas; 8

Kiel infanoj de sentaŭguloj kaj sennomuloj, Ili estas
elpelitaj el la lando. **9** Kaj nun mi fariĝis objekto de
ilia mokokanto, Mi fariĝis por ili objekto de babilado.
**10** Ili abomenas min, malproksimiĝas de mi, Ne timas
kraĉi sur mian vizaĝon. **11** Li malligis mian ŝnuron
kaj turmentas min, Kaj ili forĵetis antaŭ mi la bridon.
**12** Dekstre buboj stariĝis, kaj puŝas miajn piedojn;
Ili ebenigis kontraŭ mi siajn pereigajn vojojn; **13** Ili
disfosis mian vojon, facile pereigas min, Ne bezonante
helpanton; **14** Ili venas kiel tra larĝa breĉo, Ĵetas sin
tumulte. **15** Teruroj turnis sin kontraŭ min, Forpelis
mian majeston kiel vento; Kiel nubo foriris mia feliĉo.
**16** Kaj nun elverŝiĝas mia animo; Kaptis min tagoj
de mizero. **17** En la nokto miaj ostoj traboriĝas en
mi, Kaj miaj mordetantoj ne dormas. **18** Kun granda
malfacileco demetiĝas mia vesto; Premas min la rando
de mia ĉemizo. **19** Oni komparas min kun koto; Mi
similiĝis al polvo kaj cindro. **20** Mi krias al Vi, sed Vi
ne respondas al mi; Mi staras, ke Vi atentu min. **21**
Vi fariĝis kruelulo por mi; Per la forto de Via mano
Vi montras al mi Vian malamon. **22** Vi levis min en
la venton, Lasis min kaj neniigis min en la ventego.
**23** Mi scias, ke Vi transdonos min al la morto, En la
kunvenejon de ĉio vivanta. **24** Sed ĉu oni povas ne
deziri eltiri manon, Kaj krii en sia malfeliĉo? **25** Ĉu mi
ne ploris pri tiu, kiu havis malfeliĉan tempon? Ĉu
mia animo ne afliktiĝis pri malriĉulo? **26** Mi atendis
bonon, sed venis malbono; Mi esperis lumon, sed
venis mallumo. **27** Miaj internaĵoj bolas kaj ne ĉesas;
Atakis min tempo de mizero. **28** Mi estas nigra, sed ne
de la suno; Mi leviĝas en la komunumo kaj krias. **29** Mi
fariĝis frato al la ŝakaloj Kaj kamarado al la strutoj. **30**
Mia haŭto nigriĝis sur mi, Kaj miaj ostoj sekiĝis de
varmego. **31** Mia harpo fariĝis plendilo, Kaj mia fluto
fariĝis voĉo de plorantoj.

**31** Mi faris interligon kun miaj okuloj, Ke mi ne
atentu virgulinon. **2** Kia estas la parto, kiun
donas Dio de supre? Kaj kion destinas la Plejpotenculo
el la altaj sferoj? **3** Ĉu ne malfeliĉon al malpiulo, Kaj
forpuŝon de malbonagantoj? **4** Ĉu Li ne vidas mian
konduton, Ne kalkulas ĉiujn miajn paŝojn? **5** Ĉu mi
iradis en malvero, Kaj miaj piedoj rapidis al trompo? **6**
Li pesu min per justa pesilo, Kaj tiam Dio konvinkiĝos
pri mia senkulpeco. **7** Se mia paŝo forkliniĝis de la
vojo, Se mia koro sekvis miajn okulojn, Kaj se al
mia mano algluiĝis makulo: **8** Tiam mi semu kaj
alia manĝu, Kaj mia idaro elradikiĝu. **9** Se mia koro
forlogiĝis al virino, Kaj mi kaŝe atendis ĉe la pordo
de mia amiko: **10** Tiam mia edzino estu adultigata de
aliulo, Kaj aliuloj kliniĝu super ŝi. **11** Ĉar tio estus
malvirto, Tio estus krimo, kiun devas puni juĝistoj. **12**
Tio estas fajro, kiu ekstermas ĝis la abismo, Kaj mian
tutan akiritaĵon ĝi elradikigus. **13** Ĉu mi malŝatis la
rajton de mia servisto aŭ de mia servistino, Kiam ili
havis juĝan aferon kun mi? **14** Tiam kion mi farus,
kiam Dio leviĝus? Kaj kion mi respondus al Li, kiam Li
esplordemandus? **15** Lin kreis ja Tiu sama, kiu kreis
min en la ventro, Kaj Tiu sama pretigis en la ventro
ankaŭ lin. **16** Ĉu mi rifuzis la deziron de senhavuloj?
Aŭ ĉu mi turmentis la okulojn de vidvino? **17** Ĉu mian
panpecon mi manĝis sola? Ĉu ne manĝis de ĝi ankaŭ
orfo? **18** Ĉar detempe de mia juneco mi estis kiel
patro, Kaj de post la eliro el la ventro de mia patrino
mi estis gvidisto. **19** Kiam mi vidis malfeliĉulon sen
vesto Kaj malriĉulon sen kovro, **20** Ĉu tiam ne benis
min liaj lumboj, Ĉu li ne estis varmigata per la lano
de miaj ŝafoj? **21** Se mi levis mian manon kontraŭ
orfon, Ĉar mi vidis en la pordego helpon al mi, **22**
En tia okazo mia ŝultro defalu de la dorso, Kaj mia
brako rompiĝu de kano. **23** Ĉar mi timas la punon
de Dio, Kaj ĝian pezon mi ne povus elteni. **24** Ĉu mi
faris la oron mia espero, Kaj la orbulon mi nomis mia
fido? **25** Ĉu mi ĝojis, ke mia riĉeco estas granda Kaj ke
mia mano multe akiris? **26** Kiam mi vidis la lumon
brilantan Kaj la lunon majeste irantan, **27** Ĉu tiam
sekrete forlogiĝis mia koro Kaj mi sendis kisojn per
mia mano? **28** Ankaŭ tio estus krimo juĝinda, Ĉar mi
forneus per tio Dion en la alto. **29** Ĉu mi ĝojis pri
malfeliĉo de mia malamiko? Aŭ ĉu mi estis ravita, se
lin trafis malbono? **30** Mi ne permesis al mia gorĝo
peki Per eldiro de malbeno kontraŭ lia animo. **31** Ĉu
la homoj de mia tendo ne diris: Ho, se oni ne satiĝus
de lia karno! **32** Ne noktis fremdulo sur la strato;
Miajn pordojn mi malfermadis al migrantoj. **33** Ĉu
mi hommaniere kovradis miajn kulpojn, Por kaŝi en
mia brusto miajn pekojn? **34** En tia okazo mi timus
grandan homamason, Kaj malestimo de familioj min
timigus; Mi silentus, kaj ne elirus ekster la pordon.
**35** Ho, se iu aŭskultus min! Jen estas mia signo; la
Plejpotenculo respondu al mi. Se mia akuzanto skribus
libron, **36** Mi portus ĝin sur mia ŝultro, Mi metus ĝin
sur min kiel kronon, **37** Mi raportus al li pri la nombro
de miaj paŝoj; Mi alproksimiĝus al li kiel al princo. **38**

Se mia lando kriis kontraŭ mi, Kaj ĝiaj sulkoj ploris,
**39** Se ĝiajn fruktojn mi manĝis senpage, Kaj mi afliktis
la animon de ĝiaj mastroj: **40** Tiam anstataŭ tritiko
kresku por mi kardo, Kaj anstataŭ hordeo dornoj.
Finiĝis la paroloj de Ijob.

**32** Kaj tiuj tri viroj ĉesis respondi al Ijob, ĉar li
opiniis sin prava. **2** Tiam ekflamis la kolero de
Elihu, filo de BaraĤel, Buzano, el la familio de Ram.
Kontraŭ Ijob ekflamis lia kolero pro tio, ke li opiniis
sin pli prava ol Dio; **3** kaj kontraŭ liaj tri amikoj
ekflamis lia kolero pro tio, ke ili ne trovis respondon
kaj akuzis Ijobon. **4** Elihu atendis, dum ili parolis
kun Ijob, ĉar ili estis pli aĝaj ol li. **5** Sed kiam Elihu
vidis, ke ne troviĝas respondo en la buŝo de la tri
viroj, ekflamis lia kolero. **6** Kaj ekparolis Elihu, filo de
BaraĤel, la Buzano, kaj diris: Mi estas juna, kaj vi estas
maljunuloj; Tial mi hezitis kaj timis eldiri al vi mian
opinion. **7** Mi pensis: La aĝo parolu, Kaj la jarmulto
montru saĝon. **8** Sed la spirito en la homoj kaj la spiro
de la Plejpotenculo Donas al ili prudenton. **9** Ne la
grandaj estas la plej prudentaj, Kaj ne la maljunuloj
sole scias juĝi, **10** Tial mi diras: Aŭskultu min; Mi ankaŭ
eldiros mian opinion. **11** Jen mi atendis viajn vortojn,
Mi atentis vian kompetentecon, Ĝis vi trovos la ĝustan
parolon. **12** Sed atentante vin, mi vidis, Ke neniu el
vi donas al Ijob moralinstruon, Respondante al liaj
paroloj. **13** Ne diru: Ni trovis la saĝon. Dio instruu lin,
ne homo. **14** Li ne direktis al mi siajn vortojn, Kaj
per viaj diroj mi ne respondos al li. **15** Ili perdis la
kuraĝon, ili ne plu respondis; Mankas al ili vortoj.
**16** Mi atendis, ĝis ili ĉesos paroli; Sed ĉar ili haltis
kaj ne plu respondis, **17** Tial ankaŭ mi de mia flanko
respondos, Mi ankaŭ eldiros mian opinion. **18** Ĉar mi
estas plena de vortoj; La spirito de mia interno min
premas. **19** Mia interno estas kiel vino ŝtopfermita,
Kiu krevigas novan felsakon. **20** Mi ekparolos, kaj tiam
fariĝos al mi pli facile; Mi malfermos mian buŝon, kaj
mi respondos. **21** Mi ne atentos la vizaĝon de persono,
Kaj mi ne flatos al homo; **22** Ĉar mi ne povoscias flati;
Aliokaze pereigu min mia Kreinto.

**33** Aŭskultu do, Ijob, miajn parolojn, Kaj atentu
ĉiujn miajn vortojn. **2** Jen mi malfermis mian
buŝon, Parolas mia lango en mia gorĝo. **3** Ĝuste el mia
koro estas miaj paroloj, Kaj puran scion eldiros miaj
lipoj. **4** La spirito de Dio min kreis, Kaj la spiro de la
Plejpotenculo min vivigas. **5** Se vi povas, respondu
al mi; Armu vin kontraŭ mi, kaj stariĝu. **6** Jen mi
simile al vi estas de Dio; Mi ankaŭ estas farita el
argilo. **7** Vidu, vi ne bezonas timi min, Kaj mia ŝarĝo
ne pezos sur vi. **8** Vi parolis antaŭ miaj oreloj, Kaj
mi aŭdis la sonon de tiaj vortoj: **9** Mi estas pura, sen
malbonagoj; Senkulpa, mi ne havas pekon; **10** Jen Li
trovis ion riproĉindan en mi, Li rigardas min kiel Lian
malamikon; **11** Li metis miajn piedojn en ŝtipon; Li
observas ĉiujn miajn vojojn. **12** Sed en tio vi ne estas
prava, mi respondas al vi; Ĉar Dio estas pli granda
ol homo. **13** Kial vi havas pretendon kontraŭ Li pro
tio, Ke Li ne donas al vi kalkulraporton pri ĉiuj Siaj
faroj? **14** Cetere Dio parolas en unu maniero kaj en
alia maniero, Sed oni tion ne rimarkas. **15** En sonĝo,
en nokta vizio, Kiam sur la homojn falis dormo, Kiam
ili dormas sur la lito, **16** Tiam Li malfermas la orelon
de la homoj, Kaj, doninte instruon, sigelas ĝin, **17** Por
deturni homon de ia faro Kaj gardi viron kontraŭ
fiereco, **18** Por ŝirmi lian animon kontraŭ pereo Kaj
lian vivon kontraŭ falo sub glavon. **19** Ankaŭ per
malsano sur lia lito Li avertas lin, Kiam ĉiuj liaj ostoj
estas ankoraŭ fortaj. **20** Kaj abomenata fariĝas por li
en lia vivo la manĝaĵo, Kaj por lia animo la frandaĵo.
**21** Lia karno konsumiĝas tiel, ke oni ĝin jam ne vidas;
Kaj elstaras liaj ostoj, kiuj antaŭe estis nevideblaj.
**22** Kaj lia animo alproksimiĝas al la pereo, Kaj lia
vivo al la mortigo. **23** Sed se li havas por si anĝelon
proparolanton, Kvankam unu el mil, Kiu elmontrus
pri la homo lian pravecon, **24** Tiam Li indulgas lin,
kaj diras: Liberigu lin, ke li ne malsupreniru en la
tombon, Ĉar Mi trovis pardonigon. **25** Tiam lia korpo
fariĝas denove freŝa, kiel en la juneco; Li revenas al la
tagoj de sia knabeco. **26** Li preĝas al Dio, Kaj ĉi Tiu
korfavoras lin, Kaj montras al li Sian vizaĝon kun
ĝojo, Kaj rekompencas la homon laŭ lia virteco. **27**
Li rigardas la homojn, kaj diras: Mi pekis, la veron
mi kripligis, Kaj Li ne repagis al mi; **28** Li liberigis
mian animon, ke ĝi ne iru en pereon, Kaj mia vivo
vidas la lumon. **29** Ĉion ĉi tion Dio faras Du aŭ tri
fojojn kun homo, **30** Por deturni lian animon de pereo
Kaj prilumi lin per la lumo de vivo. **31** Atentu, Ijob,
aŭskultu min; Silentu, kaj mi parolos. **32** Se vi havas,
kion diri, respondu al mi; Parolu, ĉar mi dezirus, ke vi
montriĝu prava. **33** Se ne, tiam aŭskultu min; Silentu,
kaj mi instruos al vi saĝon.

**34** Elihu parolis plue, kaj diris: 2 Aŭskultu, saĝuloj,
miajn vortojn; Kaj vi, kompetentuloj, atentu
min. 3 Ĉar la orelo esploras la parolon, Kiel la palato
gustumas la manĝaĵon. 4 Decidon ni elektu al ni;
Ni esploru inter ni, kio estas bona. 5 Ĉar Ijob diris:
Mi estas prava, Sed Dio forigis mian rajton; 6 En
mia juĝa afero mi estas refutata; Turmentas min
mia sago, kvankam mi estas senkulpa. 7 Kiu homo
estas simila al Ijob, Kiu trinkas mokojn kiel akvon?
8 Kaj li estas preta aliĝi al malbonaguloj Kaj iri kun
malpiuloj; 9 Ĉar li diras: Homo ne havas utilon, Se li
serĉas favoron de Dio. 10 Tial aŭskultu min, ho saĝaj
homoj: Dio estas malproksima de malbonagoj, Kaj la
Plejpotenculo estas malproksima de maljusteco; 11
Sed Li repagas al homo laŭ liaj agoj, Kaj laŭ la vojo
de ĉiu Li renkontas lin. 12 Vere, Dio ne malbonagas,
Kaj la Plejpotenculo ne kurbigas la veron. 13 Kiu
komisiis al Li la teron? Kaj kiu starigis Lin super la
tuta mondo? 14 Se Li pensus nur pri Si, Se Li prenus al
Si Sian spiriton kaj spiron, 15 Tiam pereus absolute
ĉiu karno, Kaj homo refariĝus polvo. 16 Se vi havas
prudenton, aŭskultu ĉi tion; Atentu la voĉon de miaj
paroloj. 17 Ĉu povas regi malamanto de justeco? Ĉu vi
povas akuzi la Plejjustulon? 18 Ĉu oni povas diris al
reĝo: Sentaŭgulo; Aŭ al altranguloj: Malpiulo? 19 Sed
Li ne atentas la vizaĝon de princoj, Kaj ne preferas
riĉulon antaŭ malriĉulo; Ĉar ĉiuj estas faritaĵo de
Liaj manoj. 20 Momente ili mortas, noktomeze ili
tumultiĝas kaj malaperas; Ne de homa mano estas
forigataj la potenculoj. 21 Ĉar Liaj okuloj estas super
la vojoj de homo, Kaj ĉiujn liajn paŝojn Li vidas. 22
Ne ekzistas mallumo nek ombrego, Kie povus sin
kaŝi malbonaguloj. 23 Li ne bezonas multe klopodi
kun homo, Ke li iru al Dio por juĝo. 24 Li pereigas la
fortulojn sennombre Kaj starigas sur ilia loko aliajn;
25 Ĉar Li scias iliajn farojn; Li renversas ilin en la
nokto, kaj ili frakasiĝas. 26 Kiel malpiulojn Li frapas
ilin sur loko, kie ĉiuj vidas; 27 Pro tio, ke ili forturniĝis
de Li Kaj ne penis kompreni ĉiujn Liajn vojojn, 28 Sed
venigis al Li la kriadon de malriĉulo, Kaj Li aŭdis la
kriadon de mizeruloj. 29 Se Li kvietigas, tiam kiu povas
ribeligi? Se Li kaŝas Sian vizaĝon, tiam kiu povas Lin
vidi? Tiel estas egale kun nacio kaj kun aparta homo,
30 Por ke ne regu homo hipokrita, El la pekigantoj de
popolo. 31 Al Dio oni devas diri: Mi fieriĝis, mi ne plu
faros malbonon; 32 Kion mi ne vidas, pri tio instruu
min; Se mi faris maljustaĵon, mi ne plu faros. 33 Ĉu
konforme al via opinio Li devas repagi? Al vi ja ne
plaĉis. Vi elektu, ne mi; Kaj kion vi scias, tion diru.
34 Saĝaj homoj diros al mi, Kaj prudenta homo, kiu
min aŭskultas: 35 Ijob parolas malsaĝe, Kaj liaj vortoj
estas malprudentaj. 36 Ho, se Ijob estus elprovita ĝis
la fino, Pro tio, ke li aliĝas al homoj pekaj; 37 Ĉar al
sia peko li aldonas blasfemon; Inter ni li mokas, kaj
multe parolas kontraŭ Dio.

**35** Elihu parolis plue, kaj diris: 2 Ĉu tion vi opinias
justa, ke vi diras: Mi estas pli prava ol Dio? 3 Ĉar
vi diras: Kiom tio utilas al vi? Kian profiton mi havas
kompare kun tiu okazo, se mi pekus? 4 Mi respondos
al vi, Kaj kune ankaŭ al viaj amikoj: 5 Rigardu la
ĉielon, kaj vidu; Rigardu la nubojn, kiel tro alte ili
estas por vi. 6 Se vi pekas, kiom vi malutilas al Li?
Kaj se viaj malbonagoj estas multaj, kion vi faras al
Li? 7 Se vi estas virta, kion vi donas al Li? Aŭ kion Li
prenas el via mano? 8 Al homo, simila al vi, povas
ion fari via malbonago, Kaj via virteco havas signifon
nur por homido. 9 Pro multe da premado oni krias;
Oni ĝemas pro la brako de potenculoj. 10 Sed oni ne
diras: Kie estas Dio, kiu min kreis, Kiu donas kantojn
en la nokto, 11 Kiu instruas nin pli ol la brutojn sur la
tero, Prudentigas nin pli ol la birdojn de la ĉielo? 12
Tie ili krias pri la fiereco de la malbonuloj, Sed Li ne
respondas. 13 Tamen malvere estas, ke Dio ne aŭdas
Kaj ke la Plejpotenculo ne vidas. 14 Kvankam vi diras,
ke vi Lin ne vidas, Ekzistas tamen juĝo ĉe Li; Kaj vi
atendu Lin. 15 Sed ĉar Li nun ne montras Sian koleron
Kaj ne atentas la tro grandan malvirtecon, 16 Tial
Ijob vante malfermis sian buŝon Kaj tre multe parolas
malprudente.

**36** Kaj plue parolis Elihu, kaj diris: 2 Atendu ankoraŭ
iom; mi montros al vi, Ĉar mi havas ankoraŭ
kion paroli pro Dio. 3 Mi prenos mian scion de
malproksime, Kaj mi montros, ke mia Kreinto estas
prava. 4 Ĉar vere miaj vortoj ne estas mensogaj; Homo
sincera estas antaŭ vi. 5 Vidu, Dio estas potenca, kaj
tamen Li neniun malŝatas; Li estas potenca per la
forto de la koro. 6 Al malpiulo Li ne permesas vivi,
Kaj al mizeruloj Li donas justecon. 7 Li ne forturnas
de virtuloj Siajn okulojn, Sed kun reĝoj sur trono
Li sidigas ilin por ĉiam, Por ke ili estu altaj. 8 Kaj
se ili estas ligitaj per ĉenoj, Malliberigitaj mizere
per ŝnuroj, 9 Tiam Li montras al ili iliajn farojn kaj
kulpojn, Kiel grandaj ili estas. 10 Li malfermas ilian

orelon por la moralinstruo, Kaj diras, ke ili deturnu
sin de malbonagoj. 11 Se ili obeas kaj servas al Li, Tiam
ili finas siajn tagojn en bono Kaj siajn jarojn en stato
agrabla; 12 Sed se ili ne obeas, Tiam ili pereas per
glavo Kaj mortas en malprudento. 13 La hipokrituloj
portas en si koleron; Ili ne vokas, kiam Li ilin ligis; 14
Ilia animo mortas en juneco, Kaj ilia vivo pereas inter
la malĉastuloj. 15 Li savas la suferanton en lia mizero,
Kaj per la sufero Li malfermas ilian orelon. 16 Ankaŭ
vin Li elkondukus el la suferoj En spacon vastan, kie
ne ekzistas premateco; Kaj vi havus pacon ĉe via
tablo, plena de grasaĵoj. 17 Sed vi fariĝis plena de
kulpoj de malvirtulo; Kulpo kaj juĝo tenas sin kune. 18
Via kolero ne forlogu vin al mokado, Kaj grandeco de
elaĉeto ne deklinu vin. 19 Ĉu Li atentos vian riĉecon?
Ne, nek oron, nek forton aŭ potencon. 20 Ne strebu al
tiu nokto, Kiu forigas popolojn de ilia loko. 21 Gardu
vin, ne kliniĝu al malpieco; Ĉar tion vi komencis pro
la mizero. 22 Vidu, Dio estas alta en Sia forto. Kiu
estas tia instruanto, kiel Li? 23 Kiu povas preskribi
al Li vojon? Kaj kiu povas diri: Vi agis maljuste? 24
Memoru, ke vi honoru Liajn farojn, Pri kiuj kantas la
homoj. 25 Ĉiuj homoj ilin vidas; Homo rigardas ilin de
malproksime. 26 Vidu, Dio estas granda kaj nekonata;
La nombro de Liaj jaroj estas neesplorebla. 27 Kiam Li
malgrandigas la gutojn de akvo, Ili verŝiĝas pluve el
la nebulo; 28 Verŝiĝas la nuboj Kaj gutas sur multe
da homoj. 29 Kaj kiam Li intencas etendi la nubojn
Kiel tapiŝojn de Sia tendo, 30 Tiam Li etendas sur
ilin Sian lumon Kaj kovras la radikojn de la maro.
31 Ĉar per ili Li juĝas la popolojn Kaj donas ankaŭ
manĝaĵon abunde. 32 Per la manoj Li kovras la lumon
Kaj ordonas al ĝi aperi denove. 33 Antaŭdiras pri ĝi
ĝia bruo, Kaj eĉ la brutaroj, kiam ĝi alproksimiĝas.

## 37

Pri tio tremas mia koro Kaj saltas de sia loko.
2 Aŭskultu atente en la bruo Lian voĉon, Kaj la
sonojn, kiuj eliras el Lia buŝo. 3 Sub la tutan ĉielon Li
kurigas tion, Kaj Sian lumon al la randoj de la tero. 4
Post ĝi ekbruas la tondro; Li tondras per Sia majesta
voĉo, Kaj oni ne povas tion haltigi, kiam aŭdiĝas Lia
voĉo. 5 Mirinde tondras Dio per Sia voĉo; Li faras ion
grandan, sed ne konatan. 6 Al la neĝo Li diras: Falu sur
la teron; Ankaŭ al la pluvego, al Siaj fortaj pluvegoj.
7 Sur la manon de ĉiu homo Li metas sigelon, Por
ke ĉiuj homoj sciu Lian faron. 8 La sovaĝa besto iras
en sian kavon Kaj restas en sia loĝejo. 9 El la sudo
venas ventego, Kaj de la nordo venas malvarmo. 10 De
la spiro de Dio venas frosto, Kaj vasta akvo fariĝas
kvazaŭ fandaĵo. 11 La nubojn Li pezigas per akvo, Kaj
nubo disŝutas Lian lumon. 12 Li direktas ilin ĉirkaŭen,
kien Li volas, Por ke ili plenumu ĉion, kion Li ordonas
al ili, sur la tero: 13 Ĉu por puno de ia lando, Ĉu
por favorkoraĵo Li ilin direktas. 14 Atentu tion, Ijob;
Staru, kaj konsideru la miraklojn de Dio. 15 Ĉu vi
scias, kiamaniere Dio agigas ilin Kaj aperigas lumon el
Sia nubo? 16 Ĉu vi komprenas, ĉe la distiro de nubo,
La miraklojn de Tiu, kiu estas la plej perfekta en la
sciado? 17 Kiamaniere viaj vestoj varmiĝas, Kiam la
tero kvietiĝas de sude? 18 Ĉu vi povas etendi kun Li la
ĉielon, Firman kiel fandita spegulo? 19 Sciigu al ni,
kion ni devas diri al Li; Mi nenion povas elkonjekti
pro mallumo. 20 Ĉu estos rakontita al Li tio, kion mi
parolas? Se iu parolos, li pereos. 21 Nun oni ne povas
rigardi la lumon, kiu hele lumas en la ĉielo, Kiam la
vento pasas kaj purigas ĝin. 22 De norde venas oro;
Ĉirkaŭ Dio estas terura brilo. 23 La Plejpotenculon ni
ne povas kompreni. Li estas granda en forto, justo,
kaj vero; Li neniun premas. 24 Tial respektegas Lin la
homoj; Kaj Li atentas neniun el la saĝuloj.

## 38

La Eternulo el ventego ekparolis al Ijob, kaj
diris: 2 Kiu estas tiu, kiu mallumigas la plej
altan decidon Per vortoj sensencaj? 3 Zonu kiel viro
viajn lumbojn; Mi vin demandos, kaj vi sciigu al
Mi. 4 Kie vi estis, kiam Mi fondis la teron? Diru, se
vi havas scion. 5 Kiu starigis ĝiajn mezurojn, se vi
tion scias? Aŭ kiu etendis super ĝi rektoŝnuron? 6
Sur kio estas enfortikigitaj ĝiaj bazoj, Aŭ kiu kuŝigis
ĝian angulŝtonon, 7 Dum komuna glorkantado de la
matenaj steloj Kaj ĝojkriado de ĉiuj filoj de Dio? 8 Kiu
fermis la maron per pordoj, Kiam ĝi elpuŝiĝis kvazaŭ
el la ventro de patrino; 9 Kiam Mi faris la nubon ĝia
vesto Kaj mallumon ĝiaj vindaĵoj, 10 Kaj starigis al
ĝi limon Kaj faris riglilojn kaj pordojn, 11 Kaj diris:
Ĝis ĉi tie aliru, sed ne plu, Kaj ĉi tie rompiĝados viaj
majestaj ondoj? 12 Ĉu vi en via vivo iam ordonis al
la mateno, Montris al la matenruĝo ĝian lokon, 13
Ke ĝi kaptu la randojn de la tero, Kaj ke la malpiuloj
deskuiĝu el ĝi; 14 Ke ilia internaĵo renversiĝu kiel
koto, Kaj ke ili tute konfuziĝu; 15 Ke de la malpiuloj
forpreniĝu ilia lumo, Kaj ilia malhumila brako estu
rompita? 16 Ĉu vi venis ĝis la fontoj de la maro? Kaj ĉu
vi iradis sur la fundo de la abismo? 17 Ĉu malfermiĝis

antaŭ vi la pordego de la morto? Kaj ĉu vi vidis la
pordegon de la mallumego? 18 Ĉu vi pririgardis la
larĝon de la tero? Diru, ĉu vi scias ĉion ĉi tion? 19
Kie estas la vojo al la loĝejo de la lumo, Kaj kie estas
la loko de la mallumo, 20 Ke vi konduku ĝin al ĝia
limo, Kaj ke vi rimarku la vojetojn al ĝia domo? 21
Ĉu vi sciis, kiam vi naskiĝos Kaj kiel granda estos la
nombro de viaj tagoj? 22 Ĉu vi venis al la devenejo de
la neĝo, Kaj ĉu vi vidis la devenejon de la hajlo, 23
Kiujn Mi konservas por la tempo de suferado, Por la
tago de batalo kaj milito? 24 Kie estas la vojo, laŭ kiu
dividiĝas la lumo, Diskuras la orienta vento super la
teron? 25 Kiu destinis direkton por la fluo Kaj vojon
por la tondra fulmo, 26 Por doni pluvon sur teron, kie
neniu troviĝas, Sur dezerton senhoman, 27 Por nutri
dezerton kaj stepon Kaj kreskigi verdan herbon? 28
Ĉu la pluvo havas patron? Aŭ kiu naskigis la gutojn de
roso? 29 El kies ventro eliris la glacio? Kaj kiu naskis
la prujnon sub la ĉielo? 30 Simile al ŝtono malmoliĝas
la akvo, Kaj la supraĵo de la abismo kunfirmiĝas. 31
Ĉu vi povas ligi la ligilon de la Plejadoj? Aŭ ĉu vi
povas malligi la ligon de Oriono? 32 Ĉu vi povas elirigi
iliatempe la planedojn, Kaj konduki la Ursinon kun
ĝiaj infanoj? 33 Ĉu vi konas la leĝojn de la ĉielo? Aŭ ĉu
vi povas aranĝi ĝian regadon super la tero? 34 Ĉu vi
povas levi al la nubo vian voĉon, Ke abundo da akvo
vin kovru? 35 Ĉu vi povas sendi fulmojn, Ke ili iru kaj
diru al vi: Jen ni estas? 36 Kiu metis en la internon
la saĝon? Kaj kiu donis al la koro la prudenton? 37
Kiu estas tiel saĝa, ke li povu kalkuli la nubojn? Kaj
kiu elverŝas la felsakojn de la ĉielo, 38 Kiam la polvo
kunfandiĝas Kaj la terbuloj kungluiĝas? 39 Ĉu vi ĉasas
kaptaĵon por la leonino, Kaj satigas la leonidojn, 40
Kiam ili kuŝas en la nestegoj, Sidas embuske en la
laŭbo? 41 Kiu pretigas al la korvo ĝian manĝaĵon,
Kiam ĝiaj idoj krias al Dio, Vagflugas, ne havante, kion
manĝi?

**39** Ĉu vi scias la tempon, en kiu naskas la ibeksoj
sur la rokoj? Ĉu vi observis la akuŝiĝon de
la cervinoj? 2 Ĉu vi kalkulis la monatojn de ilia
gravedeco? Aŭ ĉu vi scias la tempon, kiam ili devas
naski? 3 Ili fleksiĝas, elĵetas siajn idojn, Liberiĝas de
siaj doloroj. 4 Iliaj infanoj fortiĝas, kreskas en libereco,
Foriras, ke ne revenas al ili. 5 Kiu donis liberecon al
la sovaĝa azeno? Kaj kiu malligis ĝiajn ligilojn? 6 La
dezerton Mi faris ĝia domo, Kaj stepon ĝia loĝejo; 7
Ĝi ridas pri la bruo de la urbo, La kriojn de pelanto
ĝi ne aŭdas; 8 La produktaĵoj de la montoj estas ĝia
manĝaĵo, Kaj ĝi serĉas ĉian verdaĵon. 9 Ĉu bubalo
volos servi al vi? Ĉu ĝi volos nokti ĉe via manĝujo?
10 Ĉu vi povas alligi bubalon per ŝnuro al bedo? Ĉu
ĝi erpos post vi valojn? 11 Ĉu vi fidos ĝin pro ĝia
granda forto? Kaj ĉu vi komisios al ĝi vian laboron?
12 Ĉu vi havos konfidon al ĝi, ke ĝi reportos viajn
semojn Kaj kolektos en vian grenejon? 13 La flugilo de
struto leviĝas gaje, Simile al la flugilo de cikonio kaj
de akcipitro; 14 Ĉar ĝi lasas sur la tero siajn ovojn
Kaj varmigas ilin en la sablo; 15 Ĝi forgesas, ke piedo
povas ilin dispremi Kaj sovaĝa besto povas ilin disbati.
16 Ĝi estas kruela por siaj idoj, kvazaŭ ili ne estus ĝiaj;
Ĝi ne zorgas pri tio, ke ĝia laboro estas vana; 17 Ĉar
Dio senigis ĝin je saĝo Kaj ne donis al ĝi prudenton.
18 Kiam ĝi leviĝas alten, Ĝi mokas ĉevalon kaj ĝian
rajdanton. 19 Ĉu vi donas forton al la ĉevalo? Ĉu vi
vestas ĝian kolon per kolharoj? 20 Ĉu vi povas saltigi
ĝin kiel akrido? Terura estas la beleco de ĝia ronkado.
21 Ĝi fosas en la valo kaj estas gaja pro forteco; Ĝi
eliras kontraŭ armiton; 22 Ĝi ridas pri timo kaj ne
senkuraĝiĝas, Kaj ne retiras sin de glavo. 23 Super
ĝi sonoras la sagujo, Brilas lanco kaj ponardego. 24
Kun bruo kaj kolero ĝi glutas teron, Kaj ne povas stari
trankvile ĉe sonado de trumpeto. 25 Kiam eksonas
la trumpeto, ĝi ekkrias: Ho, ho! Kaj de malproksime
ĝi flarsentas la batalon, Kriadon de la kondukantoj,
kaj bruon. 26 Ĉu pro via saĝo flugas la akcipitro Kaj
etendas siajn flugilojn al sudo? 27 Ĉu pro via ordono
leviĝas la aglo Kaj faras alte sian neston? 28 Sur roko
ĝi loĝas, Noktas sur dento de roko kaj de monta pinto.
29 De tie ĝi elrigardas por si manĝaĵon; Malproksime
vidas ĝiaj okuloj. 30 Ĝiaj idoj trinkas sangon; Kaj kie
estas mortigitoj, tie ĝi estas.

**40** Kaj la Eternulo plue parolis al Ijob, kaj diris: 2 Ĉu
povas blasfemanto disputi kun la Plejpotenculo?
La mallaŭdanto de Dio tion respondu. 3 Kaj Ijob
respondis al la Eternulo, kaj diris: 4 Jen mi estis
facilanima; kion mi povas respondi al Vi? Mi metas
mian manon sur mian buŝon. 5 Unu fojon mi parolis,
kaj mi ne respondos; Tion mi ne faros duan fojon.
6 Kaj la Eternulo respondis al Ijob el la ventego, kaj
diris: 7 Zonu kiel viro viajn lumbojn; Mi vin demandos,
kaj vi sciigu al Mi. 8 Ĉu vi volas senvalorigi Mian
verdikton, Akuzi Min, por ke vi montriĝu prava? 9 Se

vi havas tian brakon, kiel Dio, Kaj se vi povas tondri
per voĉo simile al Li, 10 Tiam ornamu vin per majesto,
kaj altiĝu, Vestu vin per gloro kaj belegeco; 11 Elverŝu
la furiozon de via kolero; Ekrigardu ĉion fieran kaj
humiligu ĝin; 12 Ekrigardu ĉiun fierulon kaj konfuzu
lin; Kaj frakasu la malpiulojn sur ilia loko; 13 Kaŝu ilin
ĉiujn en la tero; Ilian vizaĝon kovru per mallumo. 14
Tiam Mi gloros vin, Se via dekstra mano vin helpos. 15
Vidu la hipopotamon, kiun Mi kreis apud vi; Herbon
ĝi manĝas, kiel bovo. 16 Vidu, ĝia forto estas en ĝiaj
lumboj, Kaj ĝia fortikeco estas en la muskoloj de
ĝia ventro. 17 Ĝi streĉas sian voston kiel cedron, La
tendenoj de ĝiaj femuroj estas interplektitaj. 18 Ĝiaj
ostoj estas kiel kupraj tuboj, Ĝiaj ostoj estas kiel feraj
stangoj. 19 Ĝi estas la komenco de la vojoj de Dio; Ĝia
Kreinto donis al ĝi ĝian glavon. 20 La montoj alportas
al ĝi manĝaĵon, Kaj ĉiuj bestoj de la kampo tie ludas.
21 Sub ombroriĉaj arboj ĝi kuŝas, Sub kovro de kanoj
kaj en ŝlimo. 22 Ombroriĉaj arboj ŝirmas ĝin per sia
ombro, Ĉirkaŭas ĝin salikoj apud torentoj. 23 Se la
rivero tumultas, ĝi ne konfuziĝas; Ĝi staras trankvile,
se eĉ Jordan enverŝiĝus en ĝian buŝon. 24 Ĉu iu povas
preni ĝin antaŭ ĝiaj okuloj, Ĉu iu povas trabori per
ŝnuroj ĝian nazon?

**41** Ĉu vi povas eltiri levjatanon per fiŝhoko, Aŭ ligi
per ŝnuro ĝian langon? 2 Ĉu vi povas trameti
kanon tra ĝia nazo Kaj trapiki ĝian vangon per pikilo?
3 Ĉu ĝi multe petegos vin, Aŭ parolos al vi flataĵojn? 4
Ĉu ĝi faros interligon kun vi? Ĉu vi povas preni ĝin
kiel porĉiaman sklavon? 5 Ĉu vi amuziĝos kun ĝi kiel
kun birdo? Aŭ ĉu vi ligos ĝin por viaj knabinoj? 6 Ĉu
kamaradoj ĝin dishakos, Kaj dividos inter komercistoj?
7 Ĉu vi povas plenigi per pikiloj ĝian haŭton Kaj per
fiŝistaj hokoj ĝian kapon? 8 Metu sur ĝin vian manon;
Tiam vi bone memoros la batalon, kaj ĝin ne plu
entreprenos. 9 Vidu, la espero ĉiun trompos; Jam
ekvidinte ĝin, li falos. 10 Neniu estas tiel kuraĝa,
por inciti ĝin; Kiu do povas stari antaŭ Mi? 11 Kiu
antaŭe ion donis al Mi, ke Mi redonu al li? Sub la
tuta ĉielo ĉio estas Mia. 12 Mi ne silentos pri ĝiaj
membroj, Pri ĝia forto kaj bela staturo. 13 Kiu povas
levi ĝian veston? Kiu aliros al ĝia paro da makzeloj?
14 Kiu povas malfermi la pordon de ĝia vizaĝo? Teruro
ĉirkaŭas ĝiajn dentojn. 15 Ĝiaj fieraj skvamoj estas kiel
ŝildoj, Interligitaj per fortika sigelo; 16 Unu kuntuŝiĝas
kun la alia tiel, Ke aero ne povas trairi tra ili; 17 Unu
alfortikiĝis al la alia, Interkuniĝis kaj ne disiĝas. 18
Ĝia terno briligas lumon, Kaj ĝiaj okuloj estas kiel la
palpebroj de la ĉielruĝo. 19 El ĝia buŝo eliras torĉoj,
Elkuras flamaj fajreroj. 20 El ĝiaj nazotruoj eliras
fumo, Kiel el bolanta poto aŭ kaldrono. 21 Ĝia spiro
ekbruligas karbojn, Kaj flamo eliras el ĝia buŝo. 22
Sur ĝia kolo loĝas forto, Kaj antaŭ ĝi kuras teruro.
23 La partoj de ĝia karno estas firme kunligitaj inter
si, Tenas sin fortike sur ĝi, kaj ne ŝanceliĝas. 24 Ĝia
koro estas malmola kiel ŝtono, Kaj fortika kiel suba
muelŝtono. 25 Kiam ĝi sin levas, ektremas fortuloj,
Konsterniĝas de teruro. 26 Glavo, kiu alproksimiĝas
al ĝi, ne povas sin teni, Nek lanco, sago, aŭ kiraso.
27 Feron ĝi rigardas kiel pajlon, Kupron kiel putran
lignon. 28 Ne forpelos ĝin sago; Ŝtonoj el ŝtonĵetilo
fariĝas pajleroj antaŭ ĝi. 29 Bastonegon ĝi rigardas
kiel pajlon, Kaj ĝi mokas la sonon de lanco. 30 Sube
ĝi havas akrajn pecetojn; Kiel draŝrulo ĝi kuŝas sur
la ŝlimo. 31 Kiel kaldronon ĝi ondigas la profundon;
La maron ĝi kirlas kiel ŝmiraĵon. 32 La vojo post ĝi
lumas; La abismo aperas kiel grizaĵo. 33 Ne ekzistas
sur la tero io simila al ĝi; Ĝi estas kreita sentima. 34 Ĝi
rigardas malestime ĉion altan; Ĝi estas reĝo super ĉiuj
sovaĝaj bestoj.

**42** Ijob respondis al la Eternulo, kaj diris: 2 Mi
scias, ke Vi ĉion povas fari, Kaj ke nenio, kion Vi
entreprenas, estas malfacila por Vi. 3 Kiu estas tiu,
kiu kovras malkompetente la plej altan decidon? Jes,
mi parolis sen komprenado pri aferoj, Kiuj estas tro
misteraj por mi, kaj kiujn mi ne konas. 4 Aŭskultu, kaj
mi parolos; Mi demandos Vin, kaj Vi sciigu al mi. 5
Nur per la oreloj mi aŭdis pri Vi; Sed nun mia okulo
Vin vidis. 6 Tial mi faras al mi riproĉon, Kaj mi pentas
en polvo kaj cindro. 7 Post kiam la Eternulo parolis
tiujn vortojn al Ijob, la Eternulo diris al Elifaz, la
Temanano: Mia kolero ekflamis kontraŭ vi kaj kontraŭ
viaj du amikoj, pro tio, ke vi ne parolis antaŭ Mi tiel
ĝuste, kiel Mia servanto Ijob. 8 Prenu do nun al vi sep
bovojn kaj sep ŝafojn, kaj iru al Mia servanto Ijob,
kaj alportu bruloferon pro vi; kaj Mia servanto Ijob
preĝos por vi; ĉar nur lin Mi atentos, por ne fari al vi
punon pro tio, ke vi ne parolis antaŭ Mi tiel ĝuste, kiel
Mia servanto Ijob. 9 Kaj iris Elifaz, la Temanano, kaj
Bildad, la Ŝuĥano, kaj Cofar, la Naamano, kaj faris tion,
kion diris al ili la Eternulo. Kaj la Eternulo atentis
Ijobon. 10 Kaj la Eternulo redonis la forprenitaĵon al

Ijob, kiam li preĝis por siaj amikoj. Kaj la Eternulo
donis al Ijob duoble pli ol ĉio, kion li havis antaŭe. **11**
Kaj venis al li ĉiuj liaj fratoj kaj ĉiuj liaj fratinoj kaj
ĉiuj liaj antaŭaj konatoj, kaj ili manĝis kun li en lia
domo, kaj esprimis al li sian kunsenton, kaj konsolis
lin pri la tuta malbono, kiun la Eternulo venigis sur
lin; kaj ĉiu el ili donis al li po unu kesito, kaj ĉiu po
unu ora ringo. **12** Kaj la Eternulo benis la lastajn jarojn
de Ijob pli ol la komencajn; kaj li havis dek kvar mil
ŝafojn kaj ses mil kamelojn kaj mil parojn da bovoj kaj
mil azeninojn. **13** Kaj li havis sep filojn kaj tri filinojn.
**14** Al unu el ĉi tiuj li donis al nomon Jemima, al la dua
la nomon Kecia, kaj al la tria la nomon Keren-Hapuĥ.
**15** Kaj en la tuta lando ne troviĝis virinoj tiel belaj,
kiel la filinoj de Ijob; kaj ilia patro donis al ili heredan
posedaĵon inter iliaj fratoj. **16** Kaj post tio Ijob vivis
cent kvardek jarojn, kaj li vidis siajn filojn kaj nepojn
ĝis la kvara generacio. **17** Kaj Ijob mortis, maljuna kaj
satiĝinta de la vivo.

# Psalmaro

1 Feliĉa estas la homo, kiu ne iras laŭ konsilo de
malpiuloj, Nek staras sur vojo de pekuloj, Nek sidas
en kunsido de blasfemantoj; 2 Sed li nur havas deziron
por la leĝo de la Eternulo, Kaj pri Lia leĝo li pensas
tage kaj nokte. 3 Kaj li estos kiel arbo, plantita apud
akvaj torentoj, Donanta sian frukton en sia tempo,
Kaj kies folio ne velkas; Kaj en ĉio, kion li faras, li
sukcesos. 4 Ne tiel estas la malpiuloj; Sed ili estas
kiel grenventumaĵo, kiun disblovas la vento. 5 Tial ne
staros fortike la malpiuloj ĉe la juĝo, Nek la pekuloj
en societo de piuloj. 6 Ĉar la Eternulo konas la vojon
de piuloj; Sed la vojo de malpiuloj pereos.

2 Kial tumultas popoloj, Kaj gentoj pripensas
vanaĵon? 2 Leviĝas reĝoj de la tero, Kaj eminentuloj
konsiliĝas kune, Kontraŭ la Eternulo kaj kontraŭ Lia
sanktoleito, dirante: 3 Ni disŝiru iliajn ligilojn, Kaj ni
deĵetu de ni iliajn ŝnurojn! 4 La loĝanta en la ĉielo
ridas, La Sinjoro mokas ilin. 5 Tiam Li parolos al ili
en Sia kolero, Kaj per Sia furiozo Li ilin ektimigos,
dirante: 6 Mi starigis ja Mian reĝon Super Cion, Mia
sankta monto. 7 Mi raportos pri la decido: La Eternulo
diris al mi: Vi estas Mia filo, Hodiaŭ Mi vin naskis. 8
Petu Min, kaj Mi donos al vi popolojn por heredo, Kaj
por posedo limojn de tero. 9 Vi disbatos ilin per fera
sceptro, Kiel potan vazon vi ilin dispecigos. 10 Kaj
nun, ho reĝoj, prudentiĝu; Instruiĝu, juĝistoj de la
tero! 11 Servu al la Eternulo kun timo, Kaj ĝoju kun
tremo. 12 Kisu la filon, ke Li ne koleru, kaj vi ne pereu
sur la vojo, Ĉar baldaŭ ekbrulos Lia kolero. Feliĉaj
estas ĉiuj, kiuj fidas Lin.

3 Psalmo de David, kiam li forkuris de sia filo Abŝalom.
Ho Eternulo, kiel multaj estas miaj premantoj,
Multaj leviĝis kontraŭ mi! 2 Multaj diradas pri mia
animo: Ne ekzistas por li savo de Dio. (Sela) 3 Sed
Vi, ho Eternulo, estas ŝildo por mi, Mia honoro kaj
levanto de mia kapo. 4 Per mia voĉo mi vokas al la
Eternulo, Kaj Li respondas al mi de Sia sankta monto.
(Sela) 5 Mi kuŝiĝas kaj endormiĝas, Kaj mi vekiĝas,
ĉar la Eternulo min subtenas. 6 Mi ne timas miriadojn
da kontraŭuloj, Kiuj estas ĉirkaŭ mi. 7 Leviĝu, ho
Eternulo, savu min, mia Dio; Ĉar Vi frapis al ĉiuj miaj
malamikoj la vangojn, La dentojn de la malpiuloj Vi
frakasis. 8 Ĉe la Eternulo estas la savo; Super Via
popolo estu Via beno. (Sela)

4 Al la ĥorestro. Por kordaj instrumentoj. Psalmo
de David. Kiam mi vokas, respondu al mi, justa
mia Dio! En premo Vi liberigas min; Korfavoru min,
kaj aŭskultu mian preĝon. 2 Homidoj, ĝis kiam mia
honoro estos malhonorata? Ĝis kiam vi amos vantaĵon
kaj celos malveron? (Sela) 3 Sciu do, ke la Eternulo
apartigis la piulon por Si; La Eternulo aŭdas, kiam
mi vokas al Li. 4 Tremu, kaj ne peku; Meditu en viaj
koroj, sur viaj kuŝejoj, kaj estu fortikanimaj. (Sela) 5
Oferdonu oferojn piajn, Kaj fidu la Eternulon. 6 Multaj
diradas: Kiu montros al ni bonon? Direktu sur nin la
lumon de Via vizaĝo, ho Eternulo! 7 Vi metis ĝojon
en mian koron, pli ol dum ilia greno kaj ilia mosto
plimultiĝas. 8 Pace mi kuŝiĝas kaj tuj endormiĝas; Ĉar
Vi, ho Eternulo, loĝigas min sola en sendanĝereco.

5 Al la ĥorestro. Por blovaj instrumentoj. Psalmo
de David. Miajn vortojn aŭskultu, ho Eternulo.
Trapenetru miajn pensojn. 2 Aŭdu la voĉon de mia
krio, mia Reĝo kaj mia Dio; Ĉar al Vi mi preĝas. 3 Ho
Eternulo, matene Vi aŭdas mian voĉon; Matene mi
eldiras mian preĝon al Vi, kaj mi atendas. 4 Ĉar Vi
ne estas tia Dio, kiu amas malpiaĵon; Malbonulo ne
povas gasti ĉe Vi. 5 Fanfaronuloj ne staros antaŭ Vi;
Vi malamas ĉiujn, kiuj faras malbonon. 6 Vi pereigas
tiujn, kiuj parolas malveron; Sangavidan kaj malican
la Eternulo abomenas. 7 Kaj mi, pro Via granda favoro,
eniros en Vian domon; Mi kliniĝos en Via sankta
templo kun respektego al Vi. 8 Ho Eternulo, gvidu
min laŭ Via justeco; Pro miaj insidantoj ebenigu antaŭ
mi Vian vojon. 9 Ĉar ne ekzistas vero en ilia buŝo;
En ilia interno estas malvirteco; Malfermita tombo
estas ilia gorĝo; Per sia lango ili hipokritas. 10 Montru
ilian kulpon, ho Dio, Ke ili falu per siaj intencoj; Pro
iliaj multaj krimoj ĵetu ilin malsupren, Ĉar ili ribelis
kontraŭ Vi. 11 Kaj ekĝojos ĉiuj, kiuj fidas Vin; Ili
eterne estos gajaj, kaj Vi ilin favoros; Kaj triumfos pri
Vi tiuj, kiuj amas Vian nomon. 12 Ĉar Vi, ho Eternulo,
benas piulon; Kiel per ŝildo Vi ĉirkaŭdefendas lin per
favoro.

6 Al la ĥorestro. Por kordaj instrumentoj, por basuloj.
Psalmo de David. Ho Eternulo, ne en Via kolero
min riproĉu, Kaj ne en Via furiozo min punu. 2
Korfavoru min, ho Eternulo, ĉar mi senfortiĝis; Sanigu
min, ho Eternulo, ĉar ektremis miaj ostoj. 3 Kaj mia

animo forte ektremis; Kaj Vi, ho Eternulo, ĝis kiam? 4
Returnu Vin, ho Eternulo, savu mian animon; Helpu
min pro Via favorkoreco. 5 Ĉar en la morto ne ekzistas
memoro pri Vi; En Ŝeol, kiu gloros Vin? **(Sheol h7585)** 6 Mi
laciĝis de mia ĝemado; Ĉiun nokton mi priverŝas mian
liton; Per miaj larmoj mi malsekigas mian kuŝejon. 7
Sekiĝis de malĝojo mia vizaĝo, Maljuniĝis de ĉiuj miaj
premantoj. 8 Foriĝu de mi, ĉiuj, kiuj faras malbonon;
Ĉar aŭdis la Eternulo la voĉon de mia ploro. 9 Aŭdis
la Eternulo mian peton; La Eternulo akceptos mian
preĝon. 10 Hontigitaj kaj tre teruritaj estos ĉiuj miaj
malamikoj; Ili forturniĝos kaj tuj estos hontigitaj.

**7** Senkulpiĝo de David, kiun li kantis al la Eternulo
pri Kuŝ, la Benjamenido. Ho Eternulo, mia Dio, ĉe Vi
mi rifuĝas; helpu min kontraŭ ĉiuj miaj persekutantoj,
kaj savu min, 2 Por ke oni ne elŝiru, kiel leono,
mian animon, Ĝin disŝirante, dum neniu savas. 3
Ho Eternulo, mia Dio! se mi faris ĉi tion, Se ekzistas
maljusteco en miaj manoj, 4 Se al mia amiko mi pagis
per malbono, Aŭ se mi difektis tiun, kiu premis min
senkaŭze: 5 Tiam malamiko persekutu mian animon,
Li atingu kaj enpremu mian vivon en la teron, Kaj
mian honoron li metu en la polvon. (Sela) 6 Stariĝu,
ho Eternulo, en Via kolero, Leviĝu super la furiozon de
miaj premantoj; Kaj vekiĝu por mi, Vi, kiu ordonis fari
juĝon. 7 Kaj amaso da popoloj Vin ĉirkaŭos; Kaj super
ili reiru supren. 8 La Eternulo juĝas popolojn. Juĝu
min, ho Eternulo, laŭ mia justeco kaj laŭ mia pieco.
9 Finiĝu la malboneco de malpiuloj, kaj Vi subtenu
justulon, Vi, kiu esploras korojn kaj internaĵojn, justa
Dio! 10 Mia ŝildo estas ĉe Dio, Kiu savas piajn korojn.
11 Dio estas juĝanto justa, Kaj Dio minacanta ĉiutage.
12 Se oni ne reĝustiĝas, Li akrigas Sian glavon, Streĉas
Sian pafarkon kaj direktas ĝin. 13 Kaj Li pretigas por
ĝi mortigilojn, Siajn sagojn Li faras bruligaj. 14 Jen
tiu gravediĝis per malbono, Portis en si malicon, kaj
naskis mensogon. 15 Li fosis kavon kaj profundigis
ĝin, Kaj li falis en la kavon, kiun li pretigis. 16 Lia
malico refalos sur lian kapon, Kaj sur lian verton falos
lia krimo. 17 Mi gloros la Eternulon pro Lia justeco,
Kaj kantos la nomon de la Eternulo Plejalta.

**8** Al la ĥorestro. Por la gitito. Psalmo de David. Ho
Eternulo, nia Sinjoro, Kiel majesta estas Via nomo
sur la tuta tero! Vi levis Vian gloron super la ĉielon. 2
Per la buŝo de junaj infanoj kaj suĉinfanoj Vi fondis al
Vi potencon kontraŭ Viaj malamikoj, Por kvietigi la
malamikon kaj la venĝemulon. 3 Kiam mi rigardas
Vian ĉielon, la faron de Viaj fingroj, La lunon kaj la
stelojn, kiujn Vi estigis: 4 Kio estas homo, ke Vi lin
memoras? Kio estas homido, ke Vi pensas pri li? 5
Vi malaltigis lin malmulte antaŭ Dio; Per honoro kaj
beleco Vi lin kronis. 6 Vi faris lin reganto super la
faritaĵoj de Viaj manoj; Ĉion Vi metis sub liajn piedojn:
7 Ŝafojn kaj bovojn ĉiujn Kaj ankaŭ la sovaĝajn bestojn,
8 La birdojn de la ĉielo kaj la fiŝojn de la maro, Ĉion,
kio iras la vojojn de la maroj. 9 Ho Eternulo, nia
Sinjoro, Kiel majesta estas Via nomo sur la tuta tero!

**9** Al la ĥorestro. Por mut-labeno. Psalmo de David.
Mi gloros Vin, ho Eternulo, per mia tuta koro;
Mi rakontos ĉiujn Viajn mirindaĵojn. 2 Mi ĝojos kaj
triumfos pro Vi; Mi kantos Vian nomon, ho Vi Plejalta.
3 Ĉar miaj malamikoj turniĝas malantaŭen, Ili falas
kaj pereas antaŭ Vi. 4 Ĉar Vi faris por mi juĝon
kaj plenumon de leĝo; Vi sidiĝis sur la trono, Vi
justa juĝanto. 5 Vi indignis kontraŭ la popoloj, Vi
pereigis malpiulojn, Ilian nomon Vi ekstermis por
ĉiam kaj eterne. 6 La malamikoj malaperis, ruiniĝis
por ĉiam; Iliajn urbojn Vi renversis, La memoro pri ili
pereis kune kun ili. 7 Sed la Eternulo restas eterne,
Li pretigis Sian tronon por juĝo. 8 Kaj Li juĝos la
mondon kun justeco, Li plenumos leĝojn inter la
popoloj kun senpartieco. 9 Kaj la Eternulo estos rifuĝo
por la premato, Rifuĝo en la tempo de mizero. 10 Kaj
esperos al Vi tiuj, kiuj konas Vian nomon, Ĉar Vi ne
forlasas tiujn, kiuj serĉas Vin, ho Eternulo. 11 Kantu
al la Eternulo, kiu loĝas sur Cion, Rakontu inter la
popoloj Liajn farojn. 12 Ĉar venĝante por la sango, Li
memoras pri ili, Li ne forgesas la krion de malfeliĉuloj.
13 Estu favora al mi, ho Eternulo; Vidu, kion mi suferas
de miaj malamikoj, Vi, kiu suprenlevas min el la
pordegoj de la morto, 14 Por ke mi rakontu Vian tutan
gloron En la pordegoj de la filino de Cion Kaj mi ĝoju
pro Via savo. 15 Eniĝis la popoloj en la kavon, kiun
ili elfosis; En la reton, kiun ili metis, enkaptiĝis ilia
piedo. 16 Oni ekkonas la Eternulon laŭ la juĝo, kiun
Li faris; Per la faroj de siaj manoj estas kaptita la
malpiulo. Higajon. (Sela) 17 La malbonuloj reiru en
Ŝeolon, Ĉiuj popoloj, kiuj forgesas Dion. **(Sheol h7585)**
18 Ĉar ne por ĉiam malriĉulo estos forgesita, Kaj la
espero de mizeruloj ne pereos por eterne. 19 Leviĝu,
ho Eternulo, ke homoj ne tro fortiĝu; La popoloj estu

juĝataj antaŭ Via vizaĝo. 20 Metu, ho Eternulo, timon
sur ilin, La popoloj sciu, ke ili estas homoj. (Sela)

**10** Kial, ho Eternulo, Vi staras malproksime? Kial
Vi kaŝas Vin en la tempo de la mizero? 2 Pro
la malhumileco de malbonulo suferas malriĉulo;
Ili kaptiĝu per la artifikoj, kiujn ili elpensis. 3 Ĉar
malbonulo fanfaronas pri la kapricoj de sia animo;
Rabanto forlasas, malŝatas la Eternulon. 4 Malpiulo
en sia malhumileco ne esploras; En ĉiuj liaj pensoj
Dio ne ekzistas. 5 Li ĉiam iras forte laŭ siaj vojoj; Viaj
juĝoj estas tro alte super li; Ĉiujn siajn malamikojn li
forspitas. 6 Li diris en sia koro: Mi ne ŝanceliĝos, De
generacio al generacio neniam estos al mi malbone. 7
Lia buŝo estas plena de malbenado, trompo, kaj malico;
Sub lia lango estas suferigo kaj malvero. 8 Inside li
sidas en la vilaĝoj; Kaŝe li mortigas senkulpulon; Liaj
okuloj spionas malriĉulon. 9 Li sidas inside en kaŝita
loko, kiel leono en la kaverno; Li insidas, por kapti
malriĉulon; Kaj li kaptas malriĉulon, tirante lin en
sian reton. 10 Li insidas, alpremiĝas, Kaj la malriĉulo
falas en liajn fortajn ungegojn. 11 Li diras en sia
koro: Dio forgesis, Li kovras Sian vizaĝon, Li neniam
vidos. 12 Leviĝu, ho Eternulo; ho Dio, levu Vian
manon; Ne forgesu mizerulojn. 13 Por kio malpiulo
malŝatas Dion, Kaj diras en sia koro, ke Vi ne postulos
respondon? 14 Vi vidas ja, ĉar mizerojn kaj suferojn
Vi rigardas, por redoni laŭ Via forto. Al Vi fordonas
sin malriĉulo; Por orfo Vi estas helpanto. 15 Rompu la
brakon de malpiulo kaj malbonulo, Por ke eĉ serĉante
lian malbonon, oni ĝin ne trovu. 16 La Eternulo estas
Reĝo por eterne kaj ĉiam, Pereis la idolistoj de Lia
tero. 17 Deziron de humiluloj Vi aŭdas, ho Eternulo;
Vi fortigas ilian koron, Vi atentigas Vian orelon, 18
Por doni juĝon al orfo kaj premato, Por ke oni ĉesu
peli homon de la tero.

**11** Al la ĥorestro. De David. Ĉe la Eternulo mi rifuĝas.
Kial vi diras al mia animo: Flugu kiel birdo sur
vian monton? 2 Ĉar jen la malbonuloj streĉis pafarkon,
Almetis sagon sian al la tendeno, Por pafi kaŝe kontraŭ
la honestajn korojn. 3 Kiam la fundamentoj estas
detruitaj, Kion povas fari la justulo? 4 La Eternulo
estas en Sia sankta templo; La trono de la Eternulo
estas en la ĉielo; Liaj okuloj vidas, Liaj palpebroj
esploras la homidojn. 5 La Eternulo elprovas justulon;
Sed malpiulon kaj perfortemulon Lia animo malamas.
6 Sur la malpiulojn Li pluvigos brulantajn karbojn,
fajron kaj sulfuron; Brula vento estos kaliko, destinita
por ili. 7 Ĉar la Eternulo estas justa, Li amas justecon;
La piulo vidos Lian vizaĝon.

**12** Al la ĥorestro. Por basuloj. Psalmo de David.
Helpu, ho Eternulo, ĉar malaperis piuloj Kaj
maloftiĝis fideluloj inter la homidoj. 2 Malveron ili
parolas unuj al aliaj, Vortojn flatajn el koro hipokrita.
3 La Eternulo ekstermu ĉiun flatan buŝon Kaj langon
fanfaronantan, 4 Tiujn, kiuj diras: Per nia lango ni
venkos, Nia buŝo estas kun ni; kiu estas sinjoro super
ni? 5 Ĉar prematoj estas ruinigataj kaj malfeliĉuloj
ĝemas, Tial nun Mi Min levos, diras la Eternulo; Mi
donos savon al tiuj, kiuj sopiras pri ĝi. 6 La paroloj de
la Eternulo estas paroloj puraj, Arĝento, purigita en
tera fandujo kaj sepfoje refandita. 7 Vi, ho Eternulo,
konservos ilin, Vi gardos nin kontraŭ ĉi tiu generacio
por eterne. 8 Ĉirkaŭe aperas multe da malpiuloj, Kiam
malnobleco altiĝas inter la homidoj.

**13** Al la ĥorestro. Psalmo de David. Ĝis kiam, ho
Eternulo, Vi tute forgesos pri mi? Ĝis kiam Vi
kaŝos Vian vizaĝon antaŭ mi? 2 Ĝis kiam mi havos
zorgojn en mia animo Kaj sopirojn en mia koro
ĉiutage? Ĝis kiam mia malamiko estos supre super
mi? 3 Rigardu kaj aŭdu min, ho Eternulo, mia Dio;
Lumigu miajn okulojn, ke mi ne ekdormu per morto;
4 Ke ne diru mia malamiko: Mi lin venkis; Ke ne ĝoju
miaj premantoj, se mi falos. 5 Sed mi esperas al Via
favorkoreco; Mia koro ĝojas pro Via savo. 6 Mi kantos
al la Eternulo, Ĉar Li faris al mi bonon.

**14** Al la ĥorestro. De David. La sensaĝulo diris
en sia koro: Dio ne ekzistas. Ili sentaŭgiĝis, ili
abomeniĝis pro siaj faroj; Ekzistas neniu, kiu faras
bonon. 2 La Eternulo el la ĉielo ekrigardis la homidojn,
Por vidi, ĉu ekzistas prudentulo, kiu serĉas Dion. 3
Ĉiuj devojiĝis, ĉiuj malvirtiĝis; Ekzistas neniu, faranta
bonon, ne ekzistas eĉ unu. 4 Ĉu ne prudentiĝos ĉiuj,
kiuj faras malbonon, Kiuj manĝas mian popolon, kiel
oni manĝas panon, Kaj kiuj ne vokas al la Eternulo? 5
Tie ili forte ektimis, Ĉar Dio estas en la generacio de
la justuloj. 6 Vi malhonoris la konsilon de malriĉulo,
Sed la Eternulo estas lia rifuĝejo. 7 Ho, ke venu el
Cion savo al Izrael! Kiam la Eternulo revenigos Sian
forkaptitan popolon, Tiam triumfos Jakob kaj ĝojos
Izrael.

**15** Psalmo de David. Ho Eternulo, kiu povas gasti en
Via tendo? Kiu povas loĝi sur Via sankta monto?
2 Tiu, kiu vivas honeste, agas juste, Kaj parolas veron
el sia koro; 3 Kiu ne kalumnias per sia lango, Ne faras
malbonon al sia kunulo, Kaj ne ĵetas malhonoron
sur sian proksimulon; 4 Kiu abomenas malnoblulon
Kaj estimas la respektantojn de la Eternulo, Kiu faris
ĵuron malprofite por si kaj ĝin ne rompas; 5 Kiu sian
monon ne donas procentege, Kaj subaĉetajn donacojn
kontraŭ senkulpulo ne akceptas. Kiu tiel agas, tiu
neniam falos.

**16** Verko de David. Gardu min, ho Dio, ĉar mi rifuĝas
ĉe Vi. 2 Mi diris al la Eternulo: Vi estas mia
Sinjoro; Mi ne havas alian bonon krom Vi. 3 Al la
sanktuloj, kiuj estas sur la tero, Kaj al la majestuloj
iras mia tuta deziro. 4 Multiĝos la malĝojoj de tiuj, kiuj
sekvis alian; Mi ne verŝos iliajn sangajn verŝoferojn
Kaj ne metos iliajn nomojn en mian buŝon. 5 La
Eternulo estas mia sorta parto kaj kaliko; Vi subtenas
mian sorton. 6 Loto agrabla trafis min, Ĉarma estas
mia heredo. 7 Mi gloras la Eternulon, kiu konsilas
min; Eĉ en la nokto instruas min mia internaĵo. 8
Ĉiam mi vidas la Eternulon antaŭ mi; Ĉar Li estas ĉe
mia dekstra mano, mi ne falos. 9 Tial ĝojas mia koro,
raviĝas mia animo; Eĉ mia karno ripozas senzorge. 10
Ĉar Vi ne lasos mian animon al Ŝeol; Vi ne permesos,
ke Via sanktulo forputru. **(Sheol h7585)** 11 Vi konigos al
mi la vojon de la vivo; Multe da ĝojoj estas antaŭ Vi,
Ĉarmoj estas en Via dekstra mano eterne.

**17** Preĝo de David. Aŭskultu, ho Eternulo, la justulon,
atentu mian krion, Donu orelon al mia preĝo
el ne malsincera buŝo. 2 De Vi venos mia juĝo;
Viaj okuloj rigardos la veremecon. 3 Vi esploras
mian koron, ekzamenas ĝin en la nokto; Vi elprovas
min, Kaj Vi trovas nenion, kion mi intencus, Sed
kio ne volus eliri el mia buŝo. 4 Pri homaj faroj,
konforme al la vortoj el Via buŝo, Mi gardis min de
vojoj kontraŭleĝaj. 5 Miaj paŝoj tuj sekvas en Viaj
postesignoj, miaj piedoj ne ŝanceliĝas. 6 Mi vokas
al Vi, ĉar Vi respondos al mi, ho Dio; Klinu al mi
Vian orelon kaj aŭdu mian parolon. 7 Montru Vian
mirindan favorkorecon, Vi, kiu per Via dekstra mano
helpas la fidantojn kontraŭ la atakantoj. 8 Gardu
min kiel la pupilon de la okulo, Per la ombro de Viaj
flugiloj kaŝu min 9 De la malbonuloj, kiuj atakas min,
De miaj malamikoj, kiuj ĉirkaŭe insidas kontraŭ mia
animo. 10 Sian koron ili fermis, Per sia buŝo ili parolas
fiere. 11 Kien ni iras, ili nin ĉirkaŭas; Siajn okulojn
ili direktas, por ĵeti nin sur la teron. 12 Li similas
leonon, kiu avidas akiron, Kaj leonidon, kiu sidas en
kaŝita loko. 13 Leviĝu, ho Eternulo, antaŭvenu kaj
renversu lin; Savu mian animon kontraŭ la malbonulo
per Via glavo, 14 Kontraŭ la homoj, ho Eternulo, per
Via mano, Kontraŭ la homoj de ĉi tiu mondo, kiuj
havas sian parton en la nuna vivo, Kaj kies ventron Vi
plenigis per Viaj trezoroj, Ke iliaj filoj estos sataj kaj
ili lasos restaĵon por siaj infanoj. 15 Kaj mi en pieco
rigardos Vian vizaĝon; Vekiĝante, mi satiĝos per Via
bildo.

**18** Al la Ĥorestro. De la sklavo de la Eternulo, David,
kiu eldiris al la Eternulo la vortojn de ĉi tiu
kanto, kiam la Eternulo lin savis el la manoj de ĉiuj
liaj malamikoj kaj el la mano de Saul. Kaj li diris: Mi
varmege Vin amas, ho Eternulo, mia forteco! 2 La
Eternulo estas mia Roko, kaj mia fortikaĵo, kaj mia
Savanto, Mia Dio, mia forta Roko, kiun mi fidas, Mia
ŝildo kaj la korno de mia savo, mia rifuĝejo. 3 Mi vokas
al la Eternulo, la glorinda; Kaj mi saviĝas de miaj
malamikoj. 4 Ĉirkaŭis min la ondoj de la morto, Kaj
torentoj pereigaj min teruris; 5 La ŝnuroj de Ŝeol min
ĉirkaŭis, La retoj de la morto min atingis. **(Sheol h7585)** 6
En mia premiteco mi vokis la Eternulon, Kaj al mia Dio
mi kriis; El Sia templo Li aŭdis mian voĉon, Kaj mia
krio al Li atingis Liajn orelojn. 7 Ektremis kaj ekskuiĝis
la tero, La fundamentoj de la montoj ekmoviĝis Kaj
ekŝanceliĝis, ĉar Li koleris. 8 Leviĝis fumo el Lia nazo,
Kaj ekstermanta fajro el Lia buŝo; Karboj ekflamis de
ĝi. 9 Li klinis la ĉielon kaj iris malsupren; Kaj densa
mallumo estis sub Liaj piedoj. 10 Kaj Li ekrajdis sur
kerubo kaj ekflugis, Kaj Li portiĝis sur la flugiloj de la
vento. 11 El la mallumo Li faris al Si kovron, Tendon
Li faris ĉirkaŭ Si el la mallumo de la akvo, densaj
nuboj. 12 De la brilo antaŭ Li, tra Liaj densaj nuboj,
Flugis hajlo kaj brulantaj karboj. 13 Kaj la Eternulo
ektondris en la ĉielo, Kaj la Plejaltulo aŭdigis Sian
voĉon; Hajlon kaj brulantajn karbojn. 14 Li ĵetis Siajn
sagojn, kaj dispelis ilin; Ĵetis multajn fulmojn, kaj
konfuzis ilin. 15 Kaj malkovriĝis la kuŝujoj de la akvoj,
Kaj nudiĝis la fundamentoj de la universo, De Via
minaca voĉo, ho Eternulo, De la kolera spirado de
Via nazo. 16 Li etendas el supre la brakon, kaj prenas
min; Li eltiras min el grandaj akvoj; 17 Li savas min

de mia potenca malamiko, Kaj de miaj malamantoj,
ĉar ili estas pli fortaj ol mi. **18** Ili atingis min en la
tago de mia malfeliĉo; Sed la Eternulo fariĝis mia
subteno. **19** Kaj Li elkondukis min en vastan lokon; Li
liberigis min, ĉar Li estas favora al mi. **20** La Eternulo
rekompencas min laŭ mia justeco; Laŭ la pureco de
miaj manoj Li repagas al mi. **21** Ĉar mi min tenis je la
vojoj de la Eternulo, Kaj mi ne faris malbonon antaŭ
mia Dio. **22** Ĉar ĉiuj Liaj leĝoj estis antaŭ mi, Kaj Liajn
ordonojn mi ne forigis de mi. **23** Mi estis senkulpa
antaŭ Li, Kaj mi gardis min, ke mi ne peku. **24** Kaj
la Eternulo rekompencis min laŭ mia justeco, Laŭ
la pureco de miaj manoj antaŭ Liaj okuloj. **25** Kun
favorkorulo Vi estas favorkora, Kun piulo Vi estas pia,
**26** Kun purulo Vi agas laŭ lia pureco, Kaj kun maliculo
laŭ lia maliceco. **27** Ĉar humilan popolon Vi helpas,
Sed altajn okulojn Vi malaltigas. **28** Ĉar Vi lumigas
mian lumilon; La Eternulo, mia Dio, lumigas mian
mallumon. **29** Ĉar kun Vi mi forkurigas militistaron,
Kaj kun mia Dio mi transsaltas muron. **30** La vojo
de Dio estas perfekta; La parolo de la Eternulo estas
tute pura; Li estas ŝildo por ĉiuj, kiuj Lin fidas. **31** Ĉar
kiu estas Dio, krom la Eternulo? Kaj kiu estas Roko,
krom nia Dio? **32** Tiu Dio, kiu ĉirkaŭzonas min per
forto Kaj perfektigas mian vojon; **33** Kiu similigas
miajn piedojn al cervaj, Kaj starigas min sur miaj
altaĵoj; **34** Kiu instruas mian manon militi, Kaj miajn
brakojn streĉi kupran pafarkon. **35** Vi donis al mi la
ŝildon de Via savo; Kaj Via dekstra mano subtenas
min, Kaj Via favoro min grandigas. **36** Vi larĝigas
mian paŝon sub mi, Por ke ne ŝanceliĝu miaj piedoj.
**37** Mi persekutas miajn malamikojn, kaj mi atingas
ilin; Kaj mi ne revenas, ĝis mi ilin pereigas. **38** Mi ilin
frakasas, ke ili ne povas plu leviĝi; Ili falas sub miajn
piedojn. **39** Vi ĉirkaŭzonas min per forto por la milito;
Miajn atakintojn Vi ĵetas sub min. **40** Vi forkurigas
de mi miajn malamikojn, Kaj miajn malamantojn mi
ekstermas. **41** Ili krias, sed ne venas helpanto; Al la
Eternulo, sed Li ne respondas al ili. **42** Mi disflugigas
ilin, kiel polvon laŭ la vento; Kiel stratan koton mi ilin
forĵetas. **43** Vi savas min de popola tumulto; Vi faras
min ĉefo de la nacioj; Popolo, kiun mi ne konas, servas
min. **44** Per atentaj oreloj ili obeas min; Aligentuloj
respektegas min. **45** Aligentuloj senfortiĝas, Kaj kuras
terurite el siaj fortikaĵoj. **46** Vivas la Eternulo; kaj
benata estu mia Roko; Kaj alte glorata estu la Dio
de mia savo: **47** Tiu Dio, kiu donas al mi venĝon Kaj
submetas al mi popolojn, **48** Kiu savas min de miaj
malamikoj, Altigas min super miaj atakintoj, Kaj savas
min de perfortulo. **49** Tial mi gloras Vin, ho Eternulo,
inter la popoloj, Kaj pri Via nomo mi kantas. **50** Li
donas grandan helpon al Sia reĝo, Kaj faras favoraĵon
al Sia sanktoleito, Al David kaj al lia idaro, por eterne.

**19** Al la ĥorestro. Psalmo de David. La ĉieloj rakontas
la gloron de Dio, Kaj la farojn de Liaj manoj
raportas la ĉiela firmaĵo. **2** Tago al tago transdonas
diron, Kaj nokto al nokto faras sciigon. **3** Sen parolo
kaj sen vortoj; Oni ne aŭdas ilian voĉon. **4** Tra la tuta
mondo iras ilia ordono, Kaj ĝis la fino de la universo
iras iliaj vortoj; Por la suno Li aranĝis tendon inter
ili. **5** Kaj ĝi eliras kiel fianĉo el sia baldakeno, Ĝojas
kiel heroo, trakuranta sian vojon. **6** Sur unu rando
de la ĉielo estas ĝia leviĝo, Kaj ĝia rondiro estas ĝis
aliaj randoj; Kaj nenio kaŝiĝas antaŭ ĝia varmego. **7**
La instruo de la Eternulo estas perfekta, ĝojigas la
animon; La atesto de la Eternulo estas certa, ĝi saĝigas
sensaĝulon. **8** La ordonoj de la Eternulo estas justaj,
ĝojigas la koron; La ordondiro de la Eternulo estas
klara, faras lumon antaŭ la okuloj. **9** La timo antaŭ
la Eternulo estas pura, restas eterne; La juĝoj de la
Eternulo estas veraj, kaj ĉiuj estas justaj. **10** Ili estas
pli dezirindaj, ol oro kaj ol multe da plej pura oro;
Ili estas pli dolĉaj, ol mielo kaj ĉelaraj mielgutoj. **11**
Ankaŭ Via sklavo instruiĝis per ili; Kiu ilin observas,
tiu havas grandan rekompencon. **12** Kiu scias siajn
erarojn? Purigu min de eraroj kaŝitaj. **13** Ankaŭ de
intencaj eraroj detenu Vian sklavon, Ke ili ne regu
super mi. Tiam mi estos perfekta, kaj pura de granda
peko. **14** Akceptu favore la vortojn el mia buŝo kaj la
parolon de mia koro antaŭ Vi, Ho Eternulo, mia Roko
kaj mia Liberiganto.

**20** Al la ĥorestro. Psalmo de David. La Eternulo
aŭskultu vin en tago de mizero; Defendu vin la
nomo de Dio de Jakob. **2** Li sendu al vi helpon el la
sanktejo, Kaj el Cion Li vin fortigu. **3** Li rememoru
ĉiujn viajn oferdonojn, Kaj via brulofero aperu grasa
antaŭ Li. (Sela) **4** Li donu al vi tion, kion deziras via
koro; Kaj ĉiujn viajn intencojn Li plenumu. **5** Ni estos
gajaj pro Via venko, Kaj pro la nomo de nia Dio ni
levos standardon. La Eternulo plenumu ĉiujn viajn
petojn. **6** Nun mi ekscias, ke la Eternulo savas Sian
sanktoleiton; Li aŭskultas lin el Sia sankta ĉielo, Forte
savas lin per Sia dekstra mano. **7** Unuj fidas veturilojn,

aliaj ĉevalojn; Sed ni alvokas la nomon de la Eternulo,
nia Dio. 8 Ili ŝanceliĝas kaj falas, Kaj ni staras kaj tenas
nin forte. 9 Ho Eternulo, savu; La Reĝo respondu al ni,
kiam ni vokas al Li.

**21** Al la ĥorestro. Psalmo de David. Ho Eternulo,
pro Via forto ĝojas la reĝo, Kaj pro Via helpo kiel
forte li triumfas! 2 Kion lia koro deziris, tion Vi donis
al li; Kaj la peton de lia buŝo Vi ne rifuzis. (Sela) 3
Vi antaŭvenas al li kun beno de bono; Vi metis sur
lian kapon kronon el pura oro. 4 Vivon li petis de Vi;
Kaj Vi donis al li longan vivon por ĉiam kaj eterne.
5 Granda estas lia honoro pro Via helpo; Gloron kaj
majeston Vi metis sur lin. 6 Vi donas al li eternajn
benojn; Vi gajigas lin per ĝojo antaŭ Via vizaĝo. 7
Ĉar la reĝo fidas la Eternulon, Kaj pro favoro de la
Plejaltulo li ne falos. 8 Trovos Via mano ĉiujn Viajn
malamikojn, Via dekstra trovos Viajn malamantojn. 9
Vi similigos ilin al brulanta forno, kiam Vi koleros;
La Eternulo englutos ilin per Sia kolero, Kaj fajro
ilin formanĝos. 10 Ilian naskitaron Vi ekstermos de
sur la tero, Kaj ilian semon el inter la homidoj. 11
Ĉar ili preparis malbonon por Vi, Pripensis atencon,
sed ne povis ĝin plenumi. 12 Vi devigos ilin turni al
Vi la dorson, Viajn tendenojn Vi direktos kontraŭ
iliajn vizaĝojn. 13 Leviĝu, ho Eternulo, en Via forto; Ni
kantos kaj gloros Vian potencon.

**22** Al la ĥorestro. Por ario: Matenkrepuska Cervino.
Psalmo de David. Mia Dio, mia Dio, kial Vi forlasis
min, Kaj estas malproksima de mia savo, de miaj
plendaj paroloj? 2 Mia Dio, mi vokas en la tago, kaj Vi
ne respondas; En la nokto, kaj mi ne trovas trankvilon.
3 Sed Vi estas sankta, Ho Vi, kiu loĝas inter la glorado
de Izrael. 4 Vin fidis niaj patroj; Ili fidis, kaj Vi ilin
helpis. 5 Al Vi ili kriadis kaj estis savataj; Vin ili fidis,
kaj ili ne devis honti. 6 Sed mi estas vermo kaj ne
homo; Mokata de la homoj, malestimata de la popolo.
7 Ĉiuj, kiuj min vidas, insultas min, Malfermegas la
buŝon, balancas la kapon, dirante: 8 Li apogis sin al la
Eternulo: Tiu helpu lin; Tiu savu lin, se Li amas lin.
9 Vi eltiris ja min el la ventro, Vi zorgis pri mi sur
la brusto de mia patrino. 10 Al Vi mi estis ĵetita de
post la momento de mia naskiĝo; De la ventro de mia
patrino Vi estas mia Dio. 11 Ne malproksimiĝu de
mi, Ĉar malfeliĉo estas proksima, kaj helpanton mi
ne havas. 12 Ĉirkaŭis min multaj bovoj, Fortaj bovoj
Baŝanaj stariĝis ĉirkaŭ mi. 13 Ili malfermegis kontraŭ
mi siajn buŝojn, Kiel leono ŝiranta kaj krieganta. 14
Kiel akvo mi disverŝiĝis, Kaj disiĝis ĉiuj miaj ostoj; Mia
koro fariĝis kiel vakso, Fandiĝis en mia interno. 15 Mia
forto elsekiĝis kiel peco da poto; Mia lango algluiĝis
al mia palato; Kaj Vi metas min en tomban polvon. 16
Ĉar ĉirkaŭis min hundoj; Amaso da malbonuloj staras
ĉirkaŭ mi; Ili mordas miajn manojn kaj piedojn. 17
Mi povas kalkuli ĉiujn miajn ostojn; Ili rigardas kaj
konstante rigardas. 18 Ili dividas miajn vestojn inter
si, Pri mia tuniko ili lotas. 19 Sed Vi, ho Eternulo, ne
malproksimiĝu; Mia forto, rapidu, por helpi min. 20
Savu de la glavo mian animon, Mian solan savu de la
hundo. 21 Savu min de buŝo de leono, Kaj helpu min
kontraŭ kornoj de bubaloj. 22 Mi predikos Vian nomon
al miaj fratoj; En la mezo de popola kunveno mi Vin
gloros. 23 Respektantoj de la Eternulo, gloru Lin;
Tuta semo de Jakob, honoru Lin; Tuta semo de Izrael,
estimegu Lin. 24 Ĉar Li ne malŝatis kaj ne malestimis
la suferojn de premato, Kaj ne kaŝis antaŭ li Sian
vizaĝon; Sed aŭskultis lin, kiam tiu kriis al Li. 25 Vin
mi gloros en granda komunumo; Mi plenumos miajn
promesojn antaŭ Liaj respektantoj. 26 La humiluloj
manĝu kaj satiĝu, Gloru la Eternulon Liaj serĉantoj;
Via koro vivu eterne. 27 Rememoros kaj revenos
al la Eternulo ĉiuj finoj de la mondo; Kaj kliniĝos
antaŭ Vi ĉiuj popolaj familioj. 28 Ĉar al la Eternulo
apartenas la reĝado; Li reĝas super la popoloj. 29
Manĝos kaj kliniĝos ĉiuj grasuloj de la tero; Antaŭ Li
genufleksos ĉiuj forirantaj al la tombo Kaj nepovantaj
konservi sian animon viva. 30 Naskotaro Lin servos;
Oni predikos pri mia Sinjoro al la estonta generacio.
31 Al naskota popolo oni venos kaj predikos Pri Lia
justeco kaj pri Liaj faroj.

**23** Psalmo de David. La Eternulo estas mia paŝtisto;
mi mankon ne havos. 2 Sur verdaj herbejoj Li
ripozigas min, Apud trankvilaj akvoj Li kondukas min.
3 Li kvietigas mian animon; Li kondukas min laŭ vojo
de la vero, pro Sia nomo. 4 Eĉ kiam mi iros tra valo
de densa mallumo, Mi ne timos malbonon, ĉar Vi
estas kun mi; Via bastono kaj apogiĝilo trankviligos
min. 5 Vi kovras por mi tablon antaŭ miaj malamikoj;
Vi ŝmiris per oleo mian kapon, mia pokalo estas
plenigita. 6 Nur bono kaj favoro sekvos min en la
daŭro de mia tuta vivo; Kaj mi restos en la domo de la
Eternulo eterne.

**24** Psalmo de David. Al la Eternulo apartenas la
tero, kaj ĉio, kio ĝin plenigas, La mondo kaj ĉiuj
ĝiaj loĝantoj. 2 Ĉar Li sur la maroj ĝin fondis Kaj
sur la akvoj ĝin fortikigis. 3 Kiu supreniros sur la
monton de la Eternulo? Kaj kiu staros ĉe Lia sankta
loko? 4 Tiu, kiu havas purajn manojn kaj senmakulan
koron, Kiu ne fordonis sian animon al malvero Kaj ne
ĵuras trompe. 5 Li ricevos benon de la Eternulo, Kaj
bonfarojn de Dio, lia savanto. 6 Tio estas la gento de
Liaj adorantoj, De la serĉantoj de Via vizaĝo, ho Dio
de Jakob. (Sela) 7 Levu, pordegoj, viajn kapojn; Kaj
leviĝu, pordoj antikvaj, Por ke eniru la Reĝo de gloro.
8 Kiu estas tiu Reĝo de gloro? La Eternulo forta kaj
potenca, La Eternulo, la potenculo de milito. 9 Levu,
pordegoj, viajn kapojn; Kaj leviĝu, pordoj antikvaj,
Por ke eniru la Reĝo de gloro. 10 Kiu estas tiu Reĝo de
gloro? La Eternulo Cebaot, Li estas la Reĝo de gloro.
(Sela)

**25** De David. Al Vi, ho Eternulo, mi levas mian
animon. 2 Ho mia Dio, Vin mi fidas; Ne lasu min
hontiĝi; Ne lasu, ke miaj malamikoj moku pri mi. 3
Ĉar neniu el tiuj, kiuj esperas al Vi, hontiĝos; Nur
tiuj hontiĝos, kiuj forlasas Vin senpripense. 4 Viajn
vojojn, ho Eternulo, montru al mi; Instruu min sekvi
Vian iradon. 5 Gvidu min en Via vero kaj lernigu
min, Ĉar Vi estas la Dio, kiu min helpas; Al Vi mi
esperas ĉiun tagon. 6 Rememoru, ho Eternulo, Vian
kompatemecon kaj Vian favorkorecon, Ĉar ili estis de
ĉiam. 7 La pekojn de mia juneco kaj miajn krimojn
ne rememoru; Laŭ Via favorkoreco rememoru min,
Pro Via boneco, ho Eternulo! 8 Bona kaj justa estas
la Eternulo, Tial Li montras al pekantoj la vojon. 9
Li gvidas la humilulojn en justeco, Kaj instruas al la
humiluloj Siajn vojojn. 10 Ĉiuj vojoj de la Eternulo
estas favorkoreco kaj fideleco al tiuj, Kiuj observas
Lian interligon kaj Liajn leĝojn. 11 Pro Via nomo, ho
Eternulo, pardonu al mi mian pekon, Ĉar ĝi estas
granda. 12 Al ĉiu homo, kiu timas la Eternulon, Li
montras la vojon, kiun tiu devas elekti. 13 Lia animo
ĝuos bonon, Kaj liaj idoj posedos la teron. 14 Konfidon
de la Eternulo havas Liaj timantoj; Kaj Sian aranĝon
Li sciigas al ili. 15 Miaj okuloj estas ĉiam direktitaj
al la Eternulo, Ĉar Li eltiras el reto miajn piedojn.
16 Turnu Vin al mi kaj korfavoru min, Ĉar mi estas
soleca kaj mizera. 17 La suferoj de mia koro estas
grandaj; El mia premateco elkonduku min. 18 Rigardu
mian suferon kaj mizeron, Kaj pardonu ĉiujn miajn
pekojn. 19 Rigardu, kiel multaj estas miaj malamikoj
Kaj per kia kruela malamo ili min malamas. 20 Gardu
mian animon kaj savu min; Ne lasu min hontiĝi, ĉar
Vin mi fidas. 21 Senkulpeco kaj justeco defendu min,
Ĉar al Vi mi esperas. 22 Liberigu, ho Dio, Izraelon el
ĉiuj liaj suferoj.

**26** De David. Juĝu min, ho Eternulo, ĉar mi iris
en sincereco kaj la Eternulon mi fidis; Mi ne
ŝanceliĝos. 2 Esploru min, ho Eternulo, kaj elprovu
min; Refandu mian internaĵon kaj mian koron. 3 Ĉar
Via favorkoreco estas antaŭ miaj okuloj; Kaj mi marŝas
en Via vero. 4 Mi ne sidas kun homoj malveremaj, Kaj
kun falsemuloj mi ne iros. 5 Mi malamas societon
de malbonfarantoj, Kaj kun malpiuloj mi ne sidos.
6 Mi lavas miajn manojn per senkulpeco; Kaj mi
moviĝas ĉirkaŭ Via altaro, ho Eternulo, 7 Por aŭdigi
laŭte gloradon Kaj famigi ĉiujn Viajn miraklojn. 8
Ho Eternulo, mi amas la ejon de Via domo, Kaj la
lokon, en kiu loĝas Via gloro. 9 Ne pereigu mian
animon kune kun la pekuloj, Nek mian vivon kun la
sangaviduloj, 10 En kies manoj estas krimo Kaj kies
dekstra mano estas plena de subaĉetaj donacoj. 11 Kaj
mi iras en senkulpeco; Liberigu min kaj korfavoru
min. 12 Mia piedo staras sur ebena loko; En kunvenoj
mi benos la Eternulon.

**27** De David. La Eternulo estas mia lumo kaj mia
savo; kiun mi devas timi? La Eternulo estas la
forto de mia vivo; kiu povas min teruri? 2 Kiam
alproksimiĝos al mi malbonfarantoj, por manĝi mian
karnon, Miaj kontraŭuloj kaj malamikoj, ili surpuŝiĝos
kaj falos. 3 Se elpaŝos kontraŭ min armeo, Mia koro
ne ektimos; Se leviĝos kontraŭ min milito, Ankaŭ
tiam mi havos fidon. 4 Nur unu aferon mi petas de
la Eternulo, nur tion mi deziras: Ke mi restu en la
domo de la Eternulo en la daŭro de mia tuta vivo,
Por rigardi la ĉarmon de la Eternulo, admiri Lian
templon. 5 Ĉar Li kovros min en Sia kabano en la
tago de malbono; Li kaŝos min en sekreta loko de Sia
tendo; Sur rokon Li levos min. 6 Kaj nun leviĝos mia
kapo super miajn malamikojn, kiuj min ĉirkaŭas; Kaj
mi oferfaros en Lia tendo oferojn de danko; Mi kantos
kaj gloros la Eternulon. 7 Aŭskultu, ho Eternulo, mian
voĉon, kiam mi vokas; Korfavoru min, kaj respondu al
mi. 8 De Vi diris al mi mia koro: Serĉu Mian vizaĝon.
Vian vizaĝon, ho Eternulo, mi serĉas. 9 Ne kaŝu antaŭ

mi Vian vizaĝon, Ne forpuŝu en kolero Vian sklavon;
Vi estis mia helpo, Ne forpuŝu kaj ne forlasu min, ho
Dio de mia savo. 10 Ĉar mia patro kaj mia patrino min
forlasis, Sed la Eternulo min akceptis. 11 Instruu al
mi, ho Eternulo, Vian vojon, Kaj konduku min sur
ĝusta irejo, spite miajn insidantojn. 12 Ne fordonu
min al la volo de miaj premantoj; Ĉar stariĝis kontraŭ
mi falsaj atestantoj, plenaj de rabemeco. 13 Se mi ne
esperus vidi la bonecon de la Eternulo En la lando
de vivantoj! 14 Esperu al la Eternulo; Tenu vin forte,
forta estu via koro; Jes, esperu al la Eternulo.

**28** De David. Al Vi, ho Eternulo, mi vokas; Mia Roko,
ne silentu al mi; Se Vi silentos al mi, mi similiĝos
al tiuj, Kiuj iras en la tombon. 2 Aŭskultu la voĉon de
mia petego, kiam mi krias al Vi, Kiam mi levas miajn
manojn al Via plejsanktejo. 3 Ne kunpereigu min kune
kun malpiuloj, kaj kun krimfarantoj, Kiuj parolas pace
kun siaj proksimuloj, Dum malbono estas en ilia koro.
4 Redonu al ili laŭ iliaj faroj kaj laŭ iliaj malbonaj agoj;
Laŭ la faroj de iliaj manoj redonu al ili; Redonu al ili,
kion ili meritas. 5 Ĉar ili ne atentas la agojn de la
Eternulo Kaj la farojn de Liaj manoj, Li disbatos ilin
kaj ne rekonstruos. 6 Glorata estu la Eternulo, Ĉar Li
aŭskultis la voĉon de mia petego. 7 La Eternulo estas
mia forto kaj mia ŝildo; Lin fidis mia koro, kaj Li helpis
min; Tial ekĝojas mia koro, Kaj per mia kanto mi Lin
gloros. 8 La Eternulo estas ilia forto, Li estas savanta
forto por Sia sanktoleito. 9 Helpu Vian popolon kaj
benu Vian heredon, Kaj paŝtu kaj altigu ilin eterne.

**29** Psalmo de David. Tributu al la Eternulo, vi
potenculoj, Tributu al la Eternulo honoron kaj
forton. 2 Tributu al la Eternulo la honoron de Lia
nomo; Kliniĝu antaŭ la Eternulo en sankta ornamo.
3 La voĉo de la Eternulo iras super la akvoj; La Dio
de gloro tondras, La Eternulo super grandaj akvoj. 4
La voĉo de la Eternulo iras kun forto, La voĉo de la
Eternulo iras kun majesto. 5 La voĉo de la Eternulo
rompas cedrojn, La Eternulo rompas la cedrojn de
Lebanon. 6 Li saltigas ilin kiel bovidon, Lebanonon
kaj Sirjonon kiel bubalidon. 7 La voĉo de la Eternulo
elhakas fajran flamon. 8 La voĉo de la Eternulo skuas
dezerton, La Eternulo skuas la dezerton Kadeŝ. 9 La
voĉo de la Eternulo igas cervinojn naski, kaj nudigas
arbarojn; Kaj en Lia templo ĉio parolas pri Lia gloro. 10
La Eternulo regis en la tempo de la diluvo, La Eternulo
restos Reĝo eterne. 11 La Eternulo donos forton al Sia
popolo, La Eternulo benos Sian popolon per paco.

**30** Psalmo-kanto ĉe inaŭguro de la Domo; de David.
Mi gloros Vin alte, ho Eternulo, Ĉar Vi levis
min kaj Vi ne lasis miajn malamikojn triumfi super
mi. 2 Ho Eternulo, mia Dio, mi vokis al Vi, Kaj Vi
min sanigis. 3 Ho Eternulo, Vi ellevis el Ŝeol mian
animon; Vi vivigis min, ke mi ne iru en la tombon.
(Sheol h7585) 4 Kantu al la Eternulo, ho Liaj piuloj, Kaj
gloru Lian sanktan nomon. 5 Ĉar nur momenton
daŭras Lia kolero, Sed tutan vivon daŭras Lia favoro;
Vespere povas esti ploro, Sed matene venos ĝojego. 6
Kaj mi diris en la tempo de mia feliĉo: Mi neniam
falos. 7 Ho Eternulo, per Via favoro Vi starigis mian
monton fortike; Sed kiam Vi kaŝis Vian vizaĝon, mi
konfuziĝis. 8 Al Vi, ho Eternulo, mi vokis, Kaj al la
Eternulo mi preĝis: 9 Kion utilos mia sango, se mi iros
en la tombon? Ĉu gloros Vin polvo? ĉu ĝi aŭdigos Vian
veron? 10 Aŭskultu, ho Eternulo, kaj korfavoru min;
Ho Eternulo, estu helpanto al mi. 11 Vi anstataŭigis al
mi mian plendon per danco; Vi deprenis de mi mian
sakaĵon kaj zonis min per ĝojo, 12 Por ke mia animo
kantu al Vi kaj ne silentiĝu. Ho Eternulo, mia Dio,
eterne mi Vin gloros.

**31** Al la ĥorestro. Psalmo de David. Vin, ho Eternulo,
mi fidas, ke mi neniam estu hontigita; Per Via
justeco savu min. 2 Klinu al mi Vian orelon, rapide
savu min! Estu por mi forta roko, fortika kastelo, por
helpi min. 3 Ĉar Vi estas mia roko kaj mia kastelo; Kaj
pro Via nomo gvidu min kaj konduku min. 4 Eligu
min el la reto, kiun ili metis kontraŭ mi; Ĉar Vi estas
mia fortikaĵo. 5 En Vian manon mi transdonas mian
spiriton; Vi savas min, ho Eternulo, Dio de la vero. 6
Mi malamas la adorantojn de vantaj idoloj, Sed mi
fidas la Eternulon. 7 Mi gajas kaj ĝojas pro Via favoro;
Ĉar Vi vidis min mizeron, Vi eksciis la suferojn de
mia animo, 8 Kaj Vi ne transdonis min en la manon
de malamiko, Vi starigis miajn piedojn sur vasta
loko. 9 Korfavoru min, ho Eternulo, ĉar mi suferas;
Malfortiĝis de malĝojo mia okulo, mia animo, kaj mia
korpo. 10 Ĉar mia vivo konsumiĝis de malĝojo kaj miaj
jaroj de ĝemado; Mia forto malaperis per mia kulpo,
kaj miaj ostoj malfortiĝis. 11 Per ĉiuj miaj malamikoj
mi fariĝis granda hontindaĵo por miaj najbaroj Kaj
teruraĵo por miaj konatoj; Kiuj vidas min sur la strato,
tiuj forkuras de mi. 12 Oni forgesis pri mi en la koro,

kiel pri mortinto; Mi fariĝis kiel rompita vazo. 13 Ĉar
mi aŭdas la insultojn de multaj; Ĉirkaŭe estas minacoj;
Ili kune konspiras kontraŭ mi, Ili intencas pereigi
mian vivon. 14 Sed mi — mi fidas Vin, ho Eternulo;
Mi diras: Vi estas mia Dio. 15 En Via mano estas mia
sorto; Savu min de la mano de miaj malamikoj kaj
persekutantoj. 16 Lumu per Via vizaĝo al Via sklavo,
Helpu min per Via boneco. 17 Ho Eternulo, ne hontigu
min, ĉar mi vokis al Vi; Hontigitaj estu la malpiuloj, ili
silentiĝu por Ŝeol. (Sheol h7585) 18 Mutiĝu la mensogaj
buŝoj, Kiuj parolas arogante kontraŭ piulo, Kun fiero
kaj malestimo. 19 Kiel granda estas Via boneco, kiun
Vi konservis por tiuj, kiuj Vin timas, Kaj kiun Vi faris
antaŭ la homoj por tiuj, kiuj Vin fidas! 20 Vi kovras
ilin per la kovro de Via vizaĝo kontraŭ homaj atencoj,
Vi kaŝas ilin en tendo kontraŭ malamikaj langoj. 21
Glorata estu la Eternulo, Kiu aperigis al mi mirindan
favoron en fortikigita urbo. 22 Kaj mi diris en mia
konfuziĝo: Mi estas forpuŝita for de Viaj okuloj; Tamen
Vi aŭskultis la voĉon de mia preĝo, kiam mi vokis al
Vi. 23 Amu la Eternulon, ĉiuj Liaj piuloj; La fidelulojn
la Eternulo gardas, Kaj Li repagas sufiĉege al tiuj, kiuj
agas malhumile. 24 Estu kuraĝaj, kaj forta estu via
koro, Vi ĉiuj, kiuj esperas al la Eternulo!

**32** Instruo de David. Feliĉa estas tiu, kies krimo
estas pardonita, kies peko estas kovrita. 2 Feliĉa
estas la homo, al kiu la Eternulo ne kalkulas lian
kulpon Kaj en kies spirito estas nenia malvero. 3
Kiam mi silentis, miaj ostoj senfortiĝis De mia ĉiutaga
ploregado. 4 Ĉar tage kaj nokte pezis sur mi Via mano;
La freŝecon de mia sukoj anstataŭis sekeco de somero.
(Sela) 5 Mian pekon mi konfesis al Vi, kaj mian kulpon
mi ne kaŝis; Mi diris: Mi konfesos miajn krimojn al
la Eternulo; Kaj Vi deprenis la kulpon de mia peko.
(Sela) 6 Pro tio preĝu antaŭ Vi ĉiu piulo en favora
tempo, Por ke ĉe la disverŝiĝo de grandaj akvoj ili
lin ne atingu. 7 Vi estas mia ŝirmo; Kontraŭ sufero
Vi min gardos, Per kantoj de savo Vi min ĉirkaŭos.
(Sela) 8 Mi prudentigos vin, kaj montros al vi la vojon,
kiun vi devas iri; Kun konsiloj Mi direktos sur vin
Mian okulon. 9 Ne estu kiel ĉevalo, kiel senprudenta
mulo, Al kiuj oni devas kateni la buŝon per brido kaj
buŝpeco, Alie ili ne venos al vi. 10 Multajn frapojn
havas la malpiulo; Sed kiu fidas la Eternulon, tiun
ĉirkaŭas favoro. 11 Ĝoju pro la Eternulo, kaj gaju, ho
justuloj; Kaj triumfu ĉiuj, kiuj havas pian koron!

**33** Ĝoje kantu, ho piuloj, antaŭ la Eternulo; Al la
justuloj konvenas glorado. 2 Gloru la Eternulon
per harpo, Per dekkorda psaltero ludu al Li. 3 Kantu
al Li novan kanton, Bone ludu al Li kun trumpetado. 4
Ĉar ĝusta estas la vorto de la Eternulo, Kaj ĉiu Lia faro
estas fidinda. 5 Li amas justecon kaj juĝon; La tero
estas plena de la boneco de la Eternulo. 6 Per la vorto
de la Eternulo estiĝis la ĉielo; Kaj per la spiro de Lia
buŝo estiĝis ĝia tuta ekzistantaro. 7 Li kolektis kiel
en tenujon la akvon de la maro, Li metis la abismojn
en konservejojn. 8 Timu la Eternulon la tuta tero;
Tremu antaŭ Li ĉiuj loĝantoj de la mondo. 9 Ĉar Li
diris, kaj tio fariĝis; Li ordonis, kaj tio aperis. 10 La
Eternulo neniigas la interkonsenton de la popoloj, Li
detruas la intencojn de la nacioj. 11 La decido de la
Eternulo restas eterne, La pensoj de Lia koro restas de
generacio al generacio. 12 Felica estas la popolo, kies
Dio estas la Eternulo; La gento, kiun Li elektis al Si
kiel heredon. 13 El la ĉielo la Eternulo rigardas, Li
vidas ĉiujn homidojn. 14 De la trono, sur kiu Li sidas,
Li rigardas ĉiujn, kiuj loĝas sur la tero, 15 Li, kiu kreis
la korojn de ili ĉiuj, Kiu rimarkas ĉiujn iliajn farojn. 16
La reĝon ne helpos granda armeo, Fortulon ne savos
granda forto. 17 Vana estas la ĉevalo por helpo, Kaj
per sia granda forto ĝi ne savos. 18 Jen la okulo de la
Eternulo estas sur tiuj, kiuj Lin timas, Kiuj esperas
Lian favoron, 19 Ke Li savu de morto ilian animon Kaj
nutru ilin en tempo de malsato. 20 Nia animo fidas la
Eternulon; Li estas nia helpo kaj nia ŝildo. 21 Ĉar pro
Li ĝojas nia koro, Ĉar ni fidas Lian sanktan nomon. 22
Via favoro, ho Eternulo, estu super ni, Kiel ni esperas
al Vi.

**34** De David, kiam li ŝajnigis sin freneza antaŭ
Abimeleĥ, kaj tiu lin forpelis kaj li foriris. Mi
gloros la Eternulon en ĉiu tempo; Ĉiam laŭdo por
Li estos en mia buŝo. 2 Per la Eternulo gloriĝas
mia animo; La humiluloj aŭdu kaj ĝoju. 3 Gloru la
Eternulon kun mi, Kaj ni altigu kune Lian nomon. 4
Mi serĉis la Eternulon, kaj Li respondis al mi, Kaj de
ĉiuj miaj danĝeroj Li savis min. 5 Kiuj rigardas al Li,
ricevas lumon, Kaj ilia vizaĝo ne kovriĝos per honto.
6 Jen ĉi tiu mizerulo vokis, kaj la Eternulo aŭdis, Kaj
de ĉiuj liaj mizeroj Li savis lin. 7 Anĝelo de la Eternulo
postenas ĉirkaŭ tiuj, kiuj Lin timas, Kaj Li ilin savas.
8 Provu kaj vidu, kiel bona estas la Eternulo; Feliĉa
estas la homo, kiu Lin fidas. 9 Timu la Eternulon, Liaj

sanktuloj; Ĉar nenio mankas al tiuj, kiuj Lin timas. 10
Leonidoj estas senhavaj kaj malsataj; Sed kiuj serĉas la
Eternulon, tiuj havas mankon en nenia bono. 11 Venu,
infanoj, aŭskultu min; Pri timo antaŭ la Eternulo mi
vin instruos. 12 Kiu ajn vi estas, homo, Kiu deziras
vivon kaj amas multajn kaj bonajn tagojn: 13 Gardu
vian langon kontraŭ malbono, Kaj vian buŝon kontraŭ
mensoga parolo; 14 Dekliniĝu de malbono kaj faru
bonon, Serĉu pacon kaj ĉasu ĝin. 15 La okuloj de la
Eternulo estas turnitaj al la piuloj, Kaj Liaj oreloj al
iliaj krioj. 16 La vizaĝo de la Eternulo estas kontraŭ
tiuj, kiuj faras malbonon, Por ekstermi de la tero la
memoron pri ili. 17 Oni krias, kaj la Eternulo aŭdas,
Kaj de ĉiuj iliaj mizeroj Li ilin savas. 18 Proksima estas
la Eternulo al tiuj, kies koro estas rompita, Kaj la
spirite suferantajn Li helpas. 19 Multaj estas la suferoj
de piulo; Sed de ĉiuj la Eternulo lin savas. 20 Li gardas
ĉiujn liajn ostojn; Eĉ unu el ili ne rompiĝos. 21 La
malbonulon mortigos la malbono; Kaj la malamantoj
de piulo pereos. 22 La Eternulo liberigas la animon de
Siaj sklavoj; Kaj ne pereos ĉiuj, kiuj Lin fidas.

**35** De David. Batalu, ho Eternulo, kontraŭ tiuj, kiuj
batalas kontraŭ mi; Militu kontraŭ tiuj, kiuj
militas kontraŭ mi. 2 Prenu ŝildon kaj armilojn, Kaj
stariĝu, por helpi min. 3 Kaj nudigu ponardegon, kaj
stariĝu kontraŭ miaj persekutantoj; Diru al mia animo:
Via helpo Mi estas. 4 Hontigitaj kaj malhonoritaj estu
tiuj, kiuj celas kontraŭ mia animo; Turniĝu reen kaj
estu hontigitaj tiuj, kiuj intencas malbonon kontraŭ
mi. 5 Ili estu kiel grenventumaĵo antaŭ vento, Kaj
anĝelo de la Eternulo ilin forpelu. 6 Ilia vojo estu
malluma kaj glitiga, Kaj anĝelo de la Eternulo ilin
persekutu. 7 Ĉar sen mia kulpo ili submetis por mi
sian reton, Sen mia kulpo ili fosis sub mia animo. 8
Venu sur lin pereo neatendite, Kaj lia reto, kiun li
kaŝis, kaptu lin; Por pereo li falu en ĝin. 9 Kaj mia
animo ĝojos pro la Eternulo, Triumfos pro Lia helpo.
10 Ĉiuj miaj ostoj diros: Ho Eternulo, kiu egalas Vin,
Kiu liberigas mizerulon de lia perfortanto, Mizerulon
kaj malriĉulon de lia rabanto? 11 Stariĝas kontraŭ
mi krimaj atestantoj; Kion mi ne scias, pri tio ili min
demandas. 12 Ili pagas al mi malbonon por bono,
Atencon kontraŭ mia animo. 13 Kaj mi dum ilia
malsano metis sur min sakaĵon, Mi turmentis mian
animon per fasto, Kaj mi preĝis sincere, kiel pri mi
mem. 14 Mi kondutis, kvazaŭ ili estus miaj amikoj,
miaj fratoj; Kiel homo, kiu funebras pri sia patrino, mi
profunde malĝojis. 15 Sed kiam mi difektiĝis, ili ĝojis,
kaj ili kuniĝis; Kuniĝis kontraŭ mi la senkoruloj, kiam
mi ne atendis: Ili ŝiris kaj ne ĉesis. 16 Laŭ la maniero
de malpiaj parazitoj, Ili kunfrapis kontraŭ mi siajn
dentojn. 17 Mia Sinjoro! kiel longe Vi tion rigardos?
Deturnu mian animon de iliaj atakoj, Mian solan de la
leonoj. 18 Mi gloros Vin en granda kunveno, Meze
de multe da popolo mi Vin laŭdos. 19 Ne ĝoju pri mi
miaj maljustaj malamikoj; Kaj tiuj, kiuj malamas min
sen mia kulpo, ne moku per la okuloj. 20 Ĉar ne pri
paco ili parolas, Kaj kontraŭ la kvietuloj sur la tero ili
pripensas malicajn intencojn. 21 Ili larĝe malfermis
kontraŭ mi sian buŝon, Kaj diris: Ha, ha! nia okulo
vidis. 22 Vi vidis, ho Eternulo; ne silentu! Mia Sinjoro,
ne malproksimiĝu de mi. 23 Vekiĝu kaj leviĝu, por fari
al mi juĝon, Mia Dio kaj mia Sinjoro, pri mia disputo.
24 Juĝu min laŭ Via justeco, ho Eternulo, mia Dio; Kaj
ili ne ĝoju pri mi. 25 Ili ne diru en sia koro: Ha, ha!
tio estas laŭ nia deziro; Ili ne diru: Ni lin englutis.
26 Ili estu hontigitaj kaj malhonoritaj ĉiuj, kiuj ĝojas
pro mia malfeliĉo; Vestiĝu per honto kaj malhonoro
tiuj, kiuj fanfaronas kontraŭ mi. 27 Triumfu kaj ĝoju
tiuj, kiuj deziras justecon por mi; Kaj ili diru ĉiam:
Granda estas la Eternulo, Kiu deziras bonstaton por
Sia sklavo. 28 Kaj mia lango rakontados pri Via justeco
Kaj ĉiutage pri Via gloro.

**36** Al la Ĥorestro. De David, sklavo de la Eternulo.
La pekado de malpiulo parolas al lia koro; Antaŭ
liaj okuloj ne ekzistas timo antaŭ Dio. 2 Ĉar ĝi flatas
al li en liaj okuloj, Ĝis lia pekado eltroviĝos kaj li
malamiĝos. 3 La paroloj de lia buŝo estas krimo kaj
malvero; Li ne volas kompreni, por fari bonon. 4
Krimon li pripensas sur sia kuŝejo; Li staras sur vojo
ne bona; Malbonon li ne abomenas. 5 Ho Eternulo, ĝis
la ĉielo atingas Via boneco, Via vereco ĝis la nuboj.
6 Via justeco estas kiel la montoj de Dio, Viaj juĝoj
estas granda abismo; Homon kaj bruton Vi helpas, ho
Eternulo. 7 Kiel grandvalora estas Via favoro, ho Dio!
Kaj la homidoj ricevas rifuĝon en la ombro de Viaj
flugiloj. 8 Ili satiĝas per la riĉa havo de Via domo, Kaj
el la rivero de Viaj bonaĵoj Vi ilin trinkigas. 9 Ĉar ĉe
Vi estas la fonto de vivo, Kaj en Via lumo ni vidas
lumon. 10 Venigu Vian favoron sur tiujn, kiuj Vin
konas, Kaj Vian bonecon sur la honestulojn. 11 Ne
paŝu sur min piedo de fiereco, Kaj mano de malpiuloj

ne renversu min. 12 Tie falu la farantoj de malbono;
Ili estu renversitaj kaj ne povu sin levi.

## 37

De David. Ne incitiĝu pro la malvirtuloj; Ne enviu
tiujn, kiuj agas maljuste. 2 Ĉar simile al herbo ili
rapide dehakiĝas, Kaj kiel verda vegetaĵo ili forvelkas.
3 Fidu la Eternulon kaj faru bonon; Loĝu sur la tero
kaj konservu honestecon. 4 Serĉu plezuron ĉe la
Eternulo, Kaj Li plenumos la dezirojn de via koro. 5
Transdonu al la Eternulo vian vojon kaj fidu Lin, Kaj
Li faros. 6 Kaj Li aperigos vian pravecon kiel lumon,
Kaj vian justecon kiel tagmezon. 7 Silentu antaŭ la
Eternulo kaj esperu al Li; Ne incitiĝu, kiam sukcesas
homo, Kiu plenumas malbonajn intencojn. 8 Detenu
vin de kolero kaj forlasu furiozon; Ne incitiĝu, ke vi
ne faru malbonon. 9 Ĉar malbonfarantoj ekstermiĝos,
Kaj la esperantaj al la Eternulo heredos la teron. 10
Ankoraŭ malmulte da tempo pasos, kaj la malpiulo
jam ne ekzistos; Vi rigardos lian lokon, kaj li ne estos.
11 Kaj la humiluloj heredos la teron Kaj ĝuos grandan
pacon. 12 Malvirtulo malbonintencas kontraŭ virtulo
Kaj frapas kontraŭ li per siaj dentoj. 13 Sed mia Sinjoro
ridas pri li; Ĉar Li vidas, ke venas lia tago. 14 Glavon
nudigas la malvirtuloj kaj streĉas sian pafarkon, Por
faligi mizerulon kaj malriĉulon kaj buĉi virtulon.
15 Ilia glavo trafos en ilian koron, Kaj iliaj pafarkoj
rompiĝos. 16 Pli bona estas la malmulto, kiun havas
virtulo, Ol la granda havo de multaj malpiuloj. 17
Ĉar la brakoj de malpiuloj rompiĝas; Sed la virtulojn
la Eternulo subtenas. 18 La Eternulo scias la tagojn
de la virtuloj; Kaj ilia havo restos eterne. 19 Ili ne
estos hontigitaj en tempo malbona, Kaj en tagoj de
malsato ili estos sataj. 20 Ĉar la malvirtuloj pereos,
Kaj la malamikoj de la Eternulo malaperos kiel beleco
de la herbejoj, Ili malaperos kiel fumo. 21 Malpiulo
prunteprenas kaj ne pagas; Sed piulo korfavoras kaj
donas. 22 Ĉar Liaj benitoj heredos la teron, Kaj Liaj
malbenitoj ekstermiĝos. 23 De la Eternulo fortikiĝas
la paŝoj de virta homo, Kaj lia vojo plaĉas al Li. 24
Falante, li ne estos forĵetita; Ĉar la Eternulo subtenos
lian manon. 25 Mi estis juna kaj mi maljuniĝis, Kaj mi
ne vidis virtulon forlasita, Nek liajn infanojn petantaj
panon. 26 Ĉiutage li korfavoras kaj pruntedonas, Kaj
liaj infanoj estos benitaj. 27 Forturniĝu de malbono
kaj faru bonon, Kaj vi vivos eterne. 28 Ĉar la Eternulo
amas justecon, Kaj ne forlasas Siajn fidelulojn; Ĉiam
ili estos gardataj; Sed la semo de la malpiuloj estos
ekstermita. 29 La virtuloj heredos la teron Kaj loĝos
sur ĝi eterne. 30 La buŝo de virtulo parolas saĝon, Kaj
lia lango diras justecon. 31 La ordonoj de lia Dio estas
en lia koro; Liaj paŝoj ne ŝanceliĝas. 32 Malvirtulo
subrigardas virtulon Kaj celas mortigi lin. 33 Sed la
Eternulo ne lasos lin en liaj manoj, Kaj ne kondamnos
lin, kiam li estos juĝata. 34 Esperu al la Eternulo kaj
tenu vin je Lia vojo, Kaj Li altigos vin, ke vi heredu la
teron; Vi vidos la ekstermon de la malvirtuloj. 35 Mi
vidis malpiulon, kiu estis spitema, Kaj tenis sin larĝe,
kiel sukplena multebranĉa arbo; 36 Sed apenaŭ mi
preterpasis, li jam ne ekzistis; Mi serĉis lin, kaj li jam
ne estis trovebla. 37 Konservu senkulpecon kaj celu
veron, Ĉar estontecon havas homo pacema; 38 Sed
la krimuloj ĉiuj estos ekstermitaj; La estonteco de la
malpiuloj pereos. 39 La virtuloj havas helpon de la
Eternulo; Li estas ilia forto en tempo de mizero. 40
Kaj la Eternulo ilin helpos kaj savos; Li savos ilin de
malbonuloj kaj helpos ilin, Ĉar ili fidas Lin.

## 38

Psalmo de David. Pro memoro. Ho Eternulo, ne
en Via kolero min riproĉu, Kaj ne en Via furiozo
min punu. 2 Ĉar Viaj sagoj penetris en min, Kaj pezas
sur mi Via mano. 3 Ekzistas neniu sana loko en mia
korpo pro Via kolero, Nenio sendifekta ekzistas en
miaj ostoj pro mia peko. 4 Ĉar miaj krimoj superas
mian kapon; Kiel peza ŝarĝo, ili estas tro pezaj por
mi. 5 Malbonodoras kaj pusas miaj ulceroj Pro mia
malsaĝeco. 6 Mi kurbiĝis kaj kliniĝis treege, La tutan
tagon mi iras malgaja. 7 Ĉar miaj internaĵoj estas
plenaj de brulumo, Kaj ne ekzistas sana loko en mia
korpo. 8 Mi tute senfortiĝis kaj kadukiĝis, Mi kriegas
pro malkvieteco de mia koro. 9 Mia Sinjoro, antaŭ Vi
estas ĉiuj miaj deziroj, Kaj mia ĝemo ne estas kaŝita
antaŭ Vi. 10 Mia koro tremegas, forlasis min mia
forto; Kaj eĉ la lumo de miaj okuloj ne estas ĉe mi.
11 Miaj amikoj kaj kamaradoj repaŝis pro mia pesto,
Kaj miaj proksimuloj stariĝis malproksime. 12 Kaj
insidis kontraŭ mi tiuj, kiuj celas mian vivon, Kaj miaj
malbondezirantoj parolas pri mia pereo, Kaj malicojn
ili pripensas ĉiutage. 13 Kaj mi estas kiel surdulo kaj
ne aŭdas; Kiel mutulo, kiu ne malfermas sian buŝon.
14 Mi estas kiel homo, kiu ne aŭdas Kaj kiu ne havas
en sia buŝo reparolon. 15 Sed al Vi, ho Eternulo, mi
esperas; Vi aŭskultos, mia Sinjoro, mia Dio. 16 Ĉar mi
diris: Ili povus ĝoji pri mi; Ili fanfaronus pri mi, kiam
mia piedo ekŝanceliĝus. 17 Ĉar mi estas preta fali, Kaj

mia sufero estas ĉiam antaŭ mi. 18 Ĉar mi konfesas
mian kulpon; Kaj min ĉagrenas mia peko. 19 Kaj la
malamikoj de mia vivo estas fortaj, Kaj multaj estas
miaj senkaŭzaj malamantoj. 20 Kaj tiuj, kiuj pagas al
mi malbonon por bono, Atakas min pro tio, ke mi
celas bonon. 21 Ne forlasu min, ho Eternulo; Mia Dio,
ne malproksimiĝu de mi. 22 Rapidu, por helpi min,
Mia Sinjoro, mia helpo!

39 Al la Ĥorestro Jedutun. Psalmo de David. Mi diris:
Mi gardos min sur miaj vojoj, ke mi ne peku
per mia lango; Mi bridos mian buŝon, kiam malpiulo
staras kontraŭ mi. 2 Mi estis muta kaj silenta, mi
silentis eĉ pri bono; Kaj mia sufero estis mordanta.
3 Ekbrulis mia koro en mia interno, En miaj pensoj
ekflamis fajro, Mi ekparolis per mia lango: 4 Sciigu al
mi, ho Eternulo, mian finon, Kaj kia estos la daŭro
de miaj tagoj, Por ke mi sciu, kiel neniiĝa mi estas.
5 Jen Vi donis al mi tagojn larĝajn kiel manplato,
Kaj la daŭro de mia vivo estas antaŭ Vi kiel nenio;
Absoluta vantaĵo estas ĉiu homo, kiel ajn forte li
starus. (Sela) 6 Nur kiel fantomo iras la homo, nur
vante li klopodas; Li kolektas, kaj ne scias, kiu ĝin
ricevos. 7 Kaj nun kion mi devas esperi, mia Sinjoro?
Mia espero estas al Vi. 8 De ĉiuj miaj pekoj liberigu
min, Ne lasu min fariĝi mokindaĵo por sensaĝulo. 9
Mi mutiĝis, mi ne malfermos mian buŝon, Ĉar Vi tion
faris. 10 Deturnu de mi Vian frapon; De Via batanta
mano mi pereas. 11 Se Vi punas homon pro lia krimo,
Tiam lia beleco konsumiĝas kiel de tineoj. Nur vantaĵo
estas ĉiu homo. (Sela) 12 Aŭskultu mian preĝon, ho
Eternulo, kaj atentu mian krion; Al miaj larmoj ne
silentu; Ĉar migranto mi estas ĉe Vi, Enmigrinto, kiel
ĉiuj miaj patroj. 13 Lasu min, ke mi vigliĝu, Antaŭ ol
mi foriros kaj ĉesos ekzisti.

40 Al la Ĥorestro. Psalmo de David. Mi atende esperis
al la Eternulo, Kaj Li kliniĝis al mi kaj aŭskultis
mian krion. 2 Kaj Li eltiris min el la pereiga foso, el la
ŝlima marĉo, Kaj Li starigis sur roko mian piedon kaj
fortikigis miajn paŝojn. 3 Kaj Li metis en mian buŝon
novan kanton, laŭdon al nia Dio. Multaj tion vidos kaj
ektimos, Kaj ili esperos al la Eternulo. 4 Feliĉa estas la
homo, kiu metis sian esperon sur la Eternulon Kaj
ne turnis sin al la fieruloj kaj al la mensogemuloj. 5
Multon Vi faris, ho Eternulo, mia Dio! Viaj mirakloj
kaj pensoj estas pri ni. Neniu egalas Vin. Mi rakontos
kaj parolos, Sed ili estas super ĉiu kalkulo. 6 Oferojn
kaj donacojn Vi ne deziras; La orelojn Vi malfermis al
mi; Bruloferojn kaj pekoferojn Vi ne postulas. 7 Tiam
mi diris: Jen mi venas; En la skribrulaĵo estas skribite
pri mi. 8 Plenumi Vian volon, mia Dio, mi deziras,
Kaj Viaj ordonoj estas en mia koro. 9 Mi predikas
justecon en granda kunveno; Jen mi ne fermas mian
buŝon, ho Eternulo, Vi tion scias. 10 Vian justecon mi
ne kaŝis en mia koro, Pri Via fideleco kaj Via helpo
mi parolis; Mi ne kaŝis Vian favorkorecon kaj Vian
verecon antaŭ la granda kunveno. 11 Vi, ho Eternulo,
ne fermu Vian favorkorecon antaŭ mi, Via boneco
kaj Via vereco ĉiam min gardu. 12 Ĉar ĉirkaŭis min
suferoj sennombraj, Atingis min miaj kulpoj, ke mi
ne povas vidi; Ili estas pli multenombraj, ol la haroj
sur mia kapo, kaj mia koro min forlasis. 13 Volu, ho
Eternulo, savi min; Ho Eternulo, rapidu helpi min. 14
Hontiĝu kaj konfuziĝu tiuj, kiuj volas pereigi mian
animon; Retiriĝu kaj estu mokataj tiuj, kiuj deziras al
mi malbonon. 15 Teruritaj estu de sia honto tiuj, Kiuj
diras al mi: Ha, ha! 16 Gaju kaj ĝoju pro Vi ĉiuj Viaj
serĉantoj; La amantoj de Via helpo diru ĉiam: Granda
estas la Eternulo. 17 Kaj mi estas mizera kaj malriĉa;
Mia Sinjoro pensu pri mi. Vi estas mia helpo kaj mia
savanto; Ho mia Dio, ne malrapidu.

41 Al la Ĥorestro. Psalmo de David. Feliĉa estas tiu,
kiu atentas senhavulon: En tago de mizero savos
lin la Eternulo. 2 La Eternulo lin gardos kaj vivigos; Li
estos feliĉa sur la tero, Kaj Vi ne transdonos lin al
la volo de liaj malamikoj. 3 La Eternulo fortigos lin
sur la lito de malsano; Lian tutan kuŝejon Vi aliigas
en la tempo de lia malsano. 4 Mi diris: Ho Eternulo,
kompatu min; Sanigu mian animon, ĉar mi pekis
antaŭ Vi. 5 Miaj malamikoj parolas malbonon pri mi,
dirante: Kiam li mortos kaj lia nomo pereos? 6 Kaj
se iu venas, por vidi min, li parolas malsincere; Lia
koro serĉas malbonon; Kaj, elirinte eksteren, li ĝin
disparolas. 7 Mallaŭte parolas inter si pri mi ĉiuj miaj
malamikoj; Ili pensas malbonon pri mi, dirante: 8
Afero pereiga atakis lin; Kaj ĉar li kuŝiĝis, li jam ne
plu leviĝos. 9 Eĉ mia konfidato, kiun mi fidis, kiu
manĝis mian panon, Levis kontraŭ min la piedon. 10
Sed Vi, ho Eternulo, korfavoru min kaj restarigu min,
Por ke mi povu repagi al ili. 11 Per tio mi scios, ke Vi
favoras min, Se mia malamiko ne triumfos super mi.
12 Kaj min Vi subtenos pro mia senkulpeco, Kaj Vi
starigos min antaŭ Via vizaĝo por ĉiam. 13 Glorata

estu la Eternulo, Dio de Izrael, De eterne ĝis eterne.
Amen, kaj amen!

**42** Al la ĥorestro. Instruo de la Koraĥidoj. Kiel cervo
sopiras al fluanta akvo, Tiel mia animo sopiras al
Vi, ho Dio. **2** Mia animo soifas Dion, la vivantan Dion;
Kiam mi venos kaj aperos antaŭ la vizaĝo de Dio? **3**
Miaj larmoj fariĝis mia pano tage kaj nokte, Ĉar oni
diras al mi ĉiutage: Kie estas via Dio? **4** Elverŝiĝas
mia animo, kiam mi rememoras, Kiel mi iradis kun
la granda homamaso, kaj kondukis ĝin en la domon
de Dio, Ĉe laŭta kantado kaj glorado de festanta
amaso. **5** Kial vi malĝojas, ho mia animo? Kaj kial vi
konsterniĝas en mi? Esperu al Dio; Ĉar ankoraŭ mi
dankos Lin, La savanton de mia vizaĝo kaj mian Dion.
**6** Malĝojas en mi mia animo; Tial mi rememoras pri
Vi en la lando de Jordan kaj Ĥermon, Sur la monto
Micar. **7** Abismo resonas al abismo per la bruo de Viaj
falakvoj; Ĉiuj Viaj akvoj kaj ondoj pasis super mi. **8** En
la tago la Eternulo aperigas al mi Sian bonecon, Kaj
en la nokto mi havas kanton al Li, Preĝon al la Dio
de mia vivo. **9** Mi diras al Dio, mia Roko: Kial Vi min
forgesis? Kial mi iradas malgaja pro la premado de
la malamiko? **10** Kvazaŭ dispremante miajn ostojn,
mokas min miaj malamikoj, Dirante al mi ĉiutage: Kie
estas via Dio? **11** Kial vi malĝojas, ho mia animo? Kaj
kial vi konsterniĝas en mi? Esperu al Dio; Ĉar ankoraŭ
mi dankos Lin, La savanton de mia vizaĝo kaj mian
Dion.

**43** Juĝu min, ho Dio, kaj defendu mian aferon
kontraŭ popolo nepia; De homo malverema kaj
maljusta savu min. **2** Ĉar Vi estas la Dio de mia forto;
kial Vi forpuŝis min? Kial mi iradas malĝoja pro la
premado de la malamiko? **3** Sendu Vian lumon kaj
Vian veron, ke ili min gvidu, Ke ili alvenigu min al
Via sankta monto kaj al Via loĝejo. **4** Kaj mi venos al
la altaro de Dio, Al la Dio de mia ĝojo kaj ĝuo; Kaj
mi gloros Vin per harpo, ho Dio, mia Dio. **5** Kial vi
malĝojas, ho mia animo? Kaj kial vi konsterniĝas en
mi? Esperu al Dio; Ĉar ankoraŭ mi dankos Lin, La
savanton de mia vizaĝo kaj mian Dion.

**44** Al la ĥorestro. Instruo de la Koraĥidoj. Ho Dio,
per niaj oreloj ni aŭdis, niaj patroj rakontis al ni,
Kion Vi faris en iliaj tagoj, en tempo antikva. **2** Vi
per Via mano forpelis popolojn, kaj ilin Vi enloĝigis;
Popolojn Vi pereigis, kaj ilin Vi vastigis. **3** Ĉar ne
per sia glavo ili akiris la teron, Kaj ne ilia brako
helpis ilin; Sed nur Via dekstra mano kaj Via brako
kaj la lumo de Via vizaĝo, Ĉar Vi ilin favoris. **4** Vi
estas mia Reĝo, ho Dio; Disponu helpon al Jakob. **5**
Per Vi ni disbatos niajn malamikojn; Per Via nomo
ni piedpremos niajn kontraŭbatalantojn. **6** Ĉar ne
mian pafarkon mi fidas, Mia glavo min ne helpos. **7**
Sed Vi helpas nin kontraŭ niaj malamikoj, Kaj niajn
malamantojn Vi kovras per honto. **8** Dion ni gloros
ĉiutage, Kaj Vian nomon ni dankos eterne. (Sela) **9**
Tamen Vi nin forlasis kaj hontigis, Kaj Vi ne eliras
kun nia militistaro. **10** Vi devigas nin forkuri de nia
malamiko, Ke niaj malamantoj nin prirabu; **11** Vi
fordonas nin por formanĝo, kiel ŝafojn, Kaj inter la
popolojn Vi disĵetis nin; **12** Vi vendis Vian popolon
por nenio, Kaj prenis por ili nenian prezon; **13** Vi faris
nin malestimataĵo por niaj najbaroj, Mokataĵo kaj
insultataĵo por niaj ĉirkaŭantoj; **14** Vi faris nin instrua
ekzemplo por la popoloj, Ke la nacioj balancas pri
ni la kapon. **15** Ĉiutage mia malhonoro estas antaŭ
mi, Kaj honto kovras mian vizaĝon, **16** Pro la voĉo de
mokanto kaj insultanto, Antaŭ la vizaĝo de malamiko
kaj venĝanto. **17** Ĉio tio trafis nin, sed ni Vin ne
forgesis, Kaj ni ne perfidiĝis al Via interligo. **18** Ne
retiriĝis nia koro, Kaj niaj paŝoj ne deflankiĝis de
Via vojo. **19** Kiam Vi batis nin sur loko de ŝakaloj
Kaj kovris nin per ombro de morto, **20** Tiam se ni
forgesus la nomon de nia Dio Kaj ni etendus niajn
manojn al fremda dio: **21** Ĉu Dio tion ne trovus? Li
ja scias la sekretojn de la koro. **22** Pro Vi ni ja estas
mortigataj ĉiutage; Oni rigardas nin kiel ŝafojn por
buĉo. **23** Leviĝu, kial Vi dormas, mia Sinjoro? Vekiĝu,
ne forpuŝu por ĉiam. **24** Kial Vi kaŝas Vian vizaĝon,
Forgesas nian mizeron kaj nian suferon? **25** Nia animo
estas ja ĵetita en la polvon; Nia korpo kliniĝis al la
tero. **26** Leviĝu; helpu kaj savu nin pro Via boneco.

**45** Al la ĥorestro. Por ŝoŝanoj. Instrua ama kanto de
la Koraĥidoj. Mia koro pleniĝis per bona temo;
Mi kantos pri reĝo; Mia lango estas kiel plumo de lerta
skribisto. **2** Vi estas la plej bela el la homidoj; Ĉarmo
estas sur viaj lipoj; Tial Dio benis vin por ĉiam. **3** Zonu
vian lumbon per glavo, Vi, forta per via majesteco
kaj beleco. **4** Kaj en via beleco prosperu, forrajdu por
la vero, Por justeco al la humiluloj; Kaj via dekstra
mano montros miraklojn. **5** Viaj sagoj estas akraj; Kaj,
faligante antaŭ vi la popolojn, Ili penetros en la koron

de la malamikoj de la reĝo. 6 Via trono estas Dia trono
por ĉiam kaj eterne; La sceptro de via regno estas
sceptro de justeco. 7 Vi amas virton kaj malamas
malvirton; Tial Dio, via Dio, oleis vin per oleo de ĝojo
pli ol viajn kamaradojn. 8 De mirho, aloo, kaj kasio
odoras ĉiuj viaj vestoj; En palacoj eburaj ĝojigas vin
muziko. 9 Reĝidinoj estas inter viaj karulinoj; Ĉe via
dekstra flanko staras edzino en Ofira oro. 10 Aŭdu,
filino, rigardu, kaj klinu vian orelon, Kaj forgesu vian
popolon kaj la domon de via patro; 11 Kaj kiam la reĝo
deziros vian belecon, Ĉar li estas via sinjoro, tiam vi
kliniĝu antaŭ li. 12 Kaj la filino de Tiro venos al vi kun
donacoj; Petegos antaŭ vi la riĉuloj de la popolo. 13
En sia plena ornamo estas interne la reĝidino; El ora
teksaĵo estas ŝia vesto. 14 En broditaj vestoj ŝi estas
kondukata al la reĝo; Post ŝi estas kondukataj al vi
knabinoj, ŝiaj koleginoj. 15 Ili estas kondukataj kun
ĝojo kaj kantoj; Ili eniras en la palacon de la reĝo.
16 Anstataŭ viaj patroj estos viaj filoj; Vi faros ilin
princoj sur la tuta tero. 17 Mi memorigos vian nomon
de generacio al generacio; Tial gloros vin popoloj
ĉiam kaj eterne.

**46** Al la Ĥorestro. De la Koraĥidoj. Por sopranuloj.
Kanto. Dio estas por ni rifuĝejo kaj forto, Helpo
en mizeroj, rapide trovata. 2 Tial ni ne timas, eĉ se
pereus la tero Kaj la montoj falus en la internon de la
maroj. 3 Bruu, bolu Liaj akvoj, Tremu la montoj de
ilia fiera ondado. (Sela) 4 Estas rivero, kies torentoj
ĝojigas la urbon de Dio, La sanktan loĝejon de la
Plejaltulo. 5 Dio estas en ĝia mezo, ĝi ne ŝanceliĝos;
Dio ĝin helpas en frua mateno. 6 Ekbruis popoloj,
ekŝanceliĝis regnoj; Li sonigis Sian voĉon, kaj la tero
fandiĝis. 7 La Eternulo Cebaot estas kun ni; Nia
defendo estas la Dio de Jakob. (Sela) 8 Iru, rigardu la
farojn de la Eternulo, Kiu faris detruojn sur la tero,
9 Kiu ĉesigas militojn ĝis la fino de la tero, Rompas
pafarkon, rompas ponardegon, Forbruligas veturilojn
per fajro. 10 Cedu, kaj sciu, ke Mi estas Dio; Mi estas
glora inter la popoloj, Mi estas glora sur la tero. 11 La
Eternulo Cebaot estas kun ni; Nia defendo estas la Dio
de Jakob. (Sela)

**47** Al la Ĥorestro. De la Koraĥidoj. Psalmo. Ĉiuj
popoloj, plaŭdu per la manoj, Kriu al Dio per
voĉo de kanto. 2 Ĉar la Eternulo Plejalta estas timinda;
Li estas granda Reĝo super la tuta tero. 3 Li subigas al
ni popolojn Kaj metas gentojn sub niajn piedojn. 4 Li
elektas por ni nian heredon, La majeston de Jakob,
kiun Li amas. (Sela) 5 Dio supreniras ĉe sonoj de ĝojo,
La Eternulo ĉe trumpetado. 6 Kantu al Dio, kantu!
Kantu al nia Reĝo, kantu! 7 Ĉar Dio estas la Reĝo de la
tuta tero: Kantu edifan kanton! 8 Dio reĝas super la
popoloj; Dio sidas sur Sia sankta trono. 9 La princoj de
la popoloj kolektiĝis, La popolo de la Dio de Abraham;
Ĉar al Dio apartenas la ŝildoj de la tero; Li estas tre
alta.

**48** Kanto-psalmo de la Koraĥidoj. Granda estas la
Eternulo, Kaj tre glora en la urbo de nia Dio, Sur
Lia sankta monto. 2 Bela altaĵo, ĝojiga por la tuta tero
Estas la monto Cion, en la norda regiono, La urbo de
la granda Reĝo. 3 Dio estas konata en ĝiaj palacoj, kiel
rifuĝejo. 4 Jen kolektiĝis la reĝoj, Sed ĉiuj kune foriris.
5 Ili vidis kaj ekmiris, Konfuziĝis kaj forkuris. 6 Teruro
ilin atakis, Tremo, kiel ĉe akuŝantino. 7 Per orienta
vento Vi ruinigis la ŝipojn de Tarŝiŝ. 8 Kion ni aŭdis,
tion ni vidis En la urbo de la Eternulo Cebaot, en la
urbo de nia Dio; Dio fortikigu ĝin por ĉiam! (Sela) 9 Ni
meditis, ho Dio, pri Via boneco, Interne de Via templo.
10 Kiel Via nomo, ho Dio, Tiel Via gloro estas en la
finoj de la tero; Plena de justeco estas Via dekstra
mano. 11 Ĝoju la monto Cion, Ĝoju la filinoj de Jehuda,
Pro Via juĝoj. 12 Iru ĉirkaŭ Cion kaj ĉirkaŭrigardu
ĝin, Kalkulu ĝiajn turojn. 13 Atentu ĝiajn fortikaĵojn,
Vizitu ĝiajn palacojn, Por ke vi rakontu al estonta
generacio. 14 Ĉar jen estas Dio, nia Dio, por ĉiam kaj
eterne; Li estos nia kondukanto ĝis la morto.

**49** Al la Ĥorestro. De la Koraĥidoj. Psalmo. Aŭskultu
ĉi tion, ĉiuj popoloj; Atentu, ĉiuj loĝantoj de la
mondo, 2 Kaj altrangulo kaj malaltrangulo, Riĉulo kaj
malriĉulo kune. 3 Mia buŝo diros saĝaĵon, Kaj la penso
de mia koro prudentaĵon. 4 Mi klinos mian orelon al
sentenco; Sur harpo mi esprimos mian enigmon. 5
Kial mi devus timi en tagoj de malbono, Kiam min
ĉirkaŭas la malboneco de miaj persekutantoj, 6 Kiuj
fidas sian potencon Kaj fanfaronas per sia granda
riĉeco? 7 Fraton tute ne liberigos homo, Nek donos al
Dio elaĉeton por li 8 (Multekosta estus la elaĉeto de
ilia animo, Kaj neniam tio estos), 9 Ke li restu viva
eterne, Ke li ne vidu la tombon. 10 Oni ja vidas, ke
saĝuloj mortas, Kaj ankaŭ malsaĝulo kaj sensciulo
pereas Kaj lasas al aliaj sian havon. 11 Ilia deziro estas,
ke iliaj domoj ekzistu por ĉiam, Kaj iliaj loĝejoj de
generacio al generacio; Ili nomas siajn bienojn laŭ

siaj nomoj. 12 Sed homo ne restas longe en honoro;
Li egaliĝas al bruto buĉota. 13 Tia estas ilia vojo,
ilia espero, Kaj iliaj posteuloj aprobas ilian opinion.
(Sela) 14 Kiel ŝafoj ili estos metataj en Ŝeolon; La
morto ilin paŝtos; Kaj matene virtuloj ilin ekposedos,
Kaj ilia bildo pereos en Ŝeol, perdinte loĝejon. **(Sheol
h7585)** 15 Sed Dio liberigos mian animon el la mano de
Ŝeol, Ĉar Li prenos min. (Sela) **(Sheol h7585)** 16 Ne timu,
kiam homo riĉiĝas, Kiam grandiĝas la gloro de lia
domo. 17 Ĉar mortante li nenion prenos; Ne iros post
li malsupren lia honoro. 18 Ĉar kvankam li ĝuigas sian
animon dum sia vivado, Kaj oni vin laŭdas por tio, ke
vi faras al vi bone, 19 Tamen li iros al la generacio de
siaj patroj, Kiuj neniam vidos lumon. 20 Homo, kiu
estas en honoro, sed ne havas prudenton, Estas egala
al bruto buĉota.

**50** Psalmo de Asaf. Dio de la dioj, la Eternulo,
ekparolis, Kaj vokis la teron de la sunleviĝo
ĝis la sunsubiro. 2 El Cion, la perfektaĵo de beleco,
Dio ekbrilis. 3 Nia Dio venas kaj ne silentas; Fajro
ekstermanta estas antaŭ Li, Ĉirkaŭ Li estas granda
ventego. 4 Li vokas la ĉielon supre kaj la teron, Por
juĝi Sian popolon: 5 Kolektu al Mi Miajn fidelulojn,
Kiuj faris kun Mi interligon ĉe oferdono. 6 Kaj la ĉielo
proklamis Lian justecon, Ĉar Dio estas tiu juĝanto.
(Sela) 7 Aŭskultu, ho Mia popolo, kaj Mi parolos; Ho
Izrael, Mi atestos pri vi; Mi estas Dio, via Dio. 8 Ne
pro viaj oferdonoj Mi vin riproĉos, Ĉar viaj bruloferoj
estas ĉiam antaŭ Mi. 9 Mi ne prenos el via domo
bovidon, Nek el viaj kortoj kaprojn: 10 Ĉar al Mi
apartenas ĉiuj bestoj en la arbaroj, Miloj da brutoj sur
la montoj; 11 Mi konas ĉiujn birdojn sur la montoj,
Kaj ĉiuj bestoj de la kampoj estas antaŭ Mi. 12 Se Mi
fariĝus malsata, Mi ne dirus al vi, Ĉar al Mi apartenas
la mondo, kaj ĉio, kio ĝin plenigas. 13 Ĉu Mi manĝas
viandon de bovoj, Kaj ĉu Mi trinkas sangon de kaproj?
14 Oferdonu al Dio dankon, Kaj plenumu antaŭ la
Plejaltulo viajn promesojn. 15 Voku Min en la tago
de mizero; Mi vin liberigos, kaj vi Min gloros. 16 Sed
al la malpiulo Dio diris: Por kio vi parolas pri Miaj
leĝoj Kaj portas Mian interligon en via buŝo, 17 Dum
vi malamas moralinstruon Kaj ĵetas Miajn vortojn
malantaŭen de vi? 18 Kiam vi vidas ŝteliston, vi aliĝas
al li, Kaj kun adultuloj vi estas partoprenanto; 19 Vian
buŝon vi uzas por malbono, Kaj via lango plektas
falsaĵon; 20 Vi sidas kaj parolas kontraŭ via frato, Pri
la filo de via patrino vi kalumnias. 21 Tion vi faris,
kaj Mi silentis; Kaj vi pensis, ke Mi estas tia, kiel vi.
Mi punos vin, kaj Mi metos ĉion antaŭ viajn okulojn.
22 Komprenu ĉi tion, vi, kiuj forgesas Dion; Alie Mi
disŝiros, kaj neniu savos. 23 Kiu oferdonas dankon, tiu
Min honoras; Kaj kiu estas singarda en la vojo, Al tiu
Mi aperigos Dian helpon.

**51** Al la ĥorestro. Psalmo de David, kiam venis al
li la profeto Natan post lia aliĝo al Bat-Ŝeba.
Korfavoru min, ho Dio, laŭ Via boneco; Laŭ Via granda
kompatemeco elstreku miajn pekojn. 2 Lavu min tute
pure de mia krimo, Kaj purigu min de mia peko. 3 Ĉar
miajn kulpojn mi konsciadas; Kaj mia peko estas ĉiam
antaŭ mi. 4 Antaŭ Vi sola mi pekis, Kaj mi faris tion,
kio estas malbona antaŭ Viaj okuloj; Tial Vi estas justa
en Via vorto Kaj pura en Via juĝo. 5 Mi estas ja naskita
en krimo; Kaj en peko gravediĝis per mi mia patrino.
6 Vi amas ja veron en la koro, Kaj en kaŝiteco Vi
aperigas al mi saĝon. 7 Senpekigu min per hisopo, kaj
mi fariĝos pura; Lavu min, kaj mi estos pli blanka ol
neĝo. 8 Aŭdigu al mi ĝojon kaj gajecon, Kaj regajiĝos
la ostoj, kiujn Vi batis. 9 Kaŝu Vian vizaĝon de miaj
pekoj, Kaj ĉiujn miajn krimojn elstreku. 10 Koron
puran kreu al mi, ho Dio, Kaj spiriton fidelan novigu
en mi. 11 Ne forpuŝu min de Via vizaĝo, Kaj Vian
sanktan spiriton ne forprenu de mi. 12 Redonu al mi la
ĝojon de Via helpo; Kaj spirito bonfara fortikigu min.
13 Mi instruos al la krimuloj Vian vojon; Kaj pekuloj
revenos al Vi. 14 Liberigu min de sango, ho Dio, Dio de
mia savo; Mia lango kantos Vian justecon. 15 Ho, mia
Sinjoro, malfermu miajn lipojn; Kaj mia buŝo rakontos
Vian gloron. 16 Ĉar Vi ne deziras oferdonon, alie mi
ĝin donus; Brulofero ne plaĉas al Vi. 17 Oferdonoj
al Dio estas spirito suferanta; Koron suferantan kaj
humilan Vi, ho Dio, ne malŝatas. 18 Bonfaru al Cion
laŭ Via favoro, Konstruu la murojn de Jerusalem; 19
Tiam plaĉos al Vi oferdonoj de pieco, brulofero kaj
plenofero; Tiam oni metos sur Vian altaron junajn
bovojn.

**52** Al la ĥorestro. Instruo de David, kiam venis
Doeg, la Edomido, kaj raportis al Saul, kaj diris
al li: David venis en la domon de Aĥimeleĥ. Kial vi
fanfaronas pro malbono, ho tirano? La boneco de Dio
estas ĉiama. 2 Pereon intencas via lango, Kiel akrigita
razilo ĝi tranĉas malicon. 3 Vi pli amas malbonon, ol
bonon; Pli mensogi, ol diri veron. (Sela) 4 Vi amas ĉian

parolon pereigan, Parolon malican. 5 Tial Dio pereigos vin por ĉiam, Elŝiros vin el via tendo, Kaj elŝetos vin el la lando de la vivantoj. (Sela) 6 Kaj virtuloj vidos kaj ektimos, Kaj pri li ili ridos, dirante: 7 Jen estas la viro, kiu ne en Dio vidis sian forton, Sed fidis sian grandan riĉecon, Sentis sin forta per sia malbonpovado. 8 Kaj mi, kiel verda olivarbo en la domo de Dio, Fidas la bonecon de Dio ĉiam kaj eterne. 9 Mi dankos Vin eterne por tio, kion Vi faris, Kaj mi esperos al Via nomo, ĉar Vi estas bona por Viaj fideluloj.

**53** Al la ĥorestro. Por maĥalato. Instruo de David. La sensaĝulo diris en sia koro: Dio ne ekzistas. Ili sentaŭgiĝis, kaj abomeniĝis en la malvirto; Ekzistas neniu, kiu faras bonon. 2 Dio el la ĉielo ekrigardis la homidojn, Por vidi, ĉu ekzistas prudentulo, kiu serĉas Dion. 3 Ĉiu devojiĝis, ĉiuj malvirtiĝis; Ekzistas neniu, faranta bonon, ne ekzistas eĉ unu. 4 Ĉu ne prudentiĝos tiuj, kiuj faras malbonon, Kiuj manĝas mian popolon, kiel oni manĝas panon, Kaj kiuj ne vokas al Dio? 5 Tie ili forte ektimis, kie timindaĵo ne ekzistis; Ĉar Dio disĵetis la ostojn de tiuj, kiuj vin sieĝas; Vi hontigis ilin, ĉar Dio ilin forpuŝis. 6 Ho, ke venu el Cion savo al Izrael! Kiam Dio revenigos Sian forkaptitan popolon, Tiam triumfos Jakob kaj ĝojos Izrael.

**54** Al la ĥorestro. Por kordaj instrumentoj. Instruo de David, kiam venis la Zifanoj, kaj diris al Saul: Jen David kaŝiĝas ĉe ni. Ho Dio, per Via nomo helpu min, Kaj per Via forto donu al mi justecon. 2 Ho Dio, aŭskultu mian preĝon, Atentu la vortojn de mia buŝo. 3 Ĉar fremduloj leviĝis kontraŭ mi, Kaj fortuloj serĉas mian animon; Ili ne havas Dion antaŭ si. (Sela) 4 Jen Dio estas mia helpanto, Mia Sinjoro estas subtenanto de mia animo. 5 Li returnos la malbonon al miaj malamikoj: Laŭ Via vereco ekstermu ilin. 6 Kun volonteco mi faros al Vi oferdonon, Mi gloros Vian nomon, ho Eternulo, ĉar ĝi estas bona; 7 Ĉar de ĉiuj suferoj Li savis min, Kaj venĝon sur miaj malamikoj vidas mia okulo.

**55** Al la ĥorestro. Por kordaj instrumentoj. Instruo de David. Aŭskultu, ho Dio, mian preĝon, Kaj ne kaŝu Vin de mia petego. 2 Atentu min, kaj respondu al mi; Mi ĝemas en mia malĝojo, kaj mi ploregas, 3 Pro la kriado de la malamiko, Pro la premado de la malbonulo, Ĉar ili preparas kontraŭ mi malicon Kaj kolere min malamas. 4 Mia koro tremas en mi; Kaj teruroj de morto min atakis; 5 Timo kaj tremo venis sur min, Kaj konsternego min kovris. 6 Kaj mi diris: Ho, se mi havus flugilojn kiel kolombo! Mi forflugus kaj mi ie ekloĝus; 7 Malproksimen mi foriĝus, Mi ekloĝus en dezerto. (Sela) 8 Mi rapidus al rifuĝejo For de ventego kaj fulmotondro. 9 Pereigu, ho mia Sinjoro, disigu ilian langon; Ĉar mi vidas rabadon kaj malpacon en la urbo. 10 Tage kaj nokte ili ĉirkaŭas ĝiajn murojn; Kaj malbonfaroj estas interne de ĝi; 11 Pereigemo estas interne de ĝi, Kaj trompo kaj falso ne forlasas ĝian straton. 12 Ne malamiko min ja insultas — mi tion tolerus; Ne mia malamanto tenas sin grande kontraŭ mi — mi kaŝus min de li; 13 Sed vi, kiu estas tia sama homo, kiel mi, Mia amiko, mia kamarado, 14 Vi, kun kiu ni kune intime paroladis, Iradis en la domon de Dio en la homamaso. 15 La morto ilin kaptu, Ili iru vivaj en Ŝeolon; Ĉar malbonagado estas en iliaj loĝejoj, en ilia mezo. (Sheol h7585) 16 Mi vokas al Dio, Kaj la Eternulo min savos. 17 Vespere kaj matene kaj tagmeze mi plendas kaj ĝemas; Kaj Li aŭskultas mian voĉon. 18 Li liberigis pace mian animon de atako kontraŭ mi, Kiam ili grandanombre estis kontraŭ mi. 19 Dio aŭskultos, kaj Li humiligos ilin, La vivanto de eterne; (Sela) Ĉar ili ne ŝanĝiĝas Kaj ili ne timas Dion. 20 Li metis sian manon sur siajn amikojn, Li rompis sian interligon; 21 Pli glata ol butero estas lia buŝo, Sed milito estas en lia koro; Liaj vortoj estas pli delikataj ol oleo, Sed ili estas nudigitaj glavoj. 22 Metu vian ŝarĝon sur la Eternulon, Kaj Li vin subtenos; Neniam Li lasos fali piulon. 23 Vi, ho Dio, malsuprenigos ilin en la foson de pereo; La homoj de sango kaj falso ne atingos la duonon de siaj tagoj; Sed mi fidas Vin.

**56** Al la ĥorestro. Por Jonatelem-reĥokim. Verko de David, kiam kaptis lin la Filiŝtoj en Gat. Korfavoru min, ho Dio, ĉar homo volas min engluti, Dum la tuta tago malamiko min premas. 2 Miaj malamikoj volas min engluti ĉiutage, Ĉar multaj militas kontraŭ mi fiere. 3 En la tago, kiam mi timas, Mi fidas Vin. 4 Dion, kies vorton mi gloras, Tiun Dion mi fidas; mi ne timas: Kion karno faros al mi? 5 Dum la tuta tago ili atakas miajn vortojn; Ĉiuj iliaj pensoj pri mi estas por malbono. 6 Ili kolektiĝas, embuskas, observas miajn paŝojn, Penante kapti mian animon. 7 Por ilia malbonago repagu al ili, En kolero faligu la popolojn, ho Dio! 8 Mian vagadon Vi kalkulis; Metu miajn larmojn en Vian felsakon, Ili estas ja en Via

libro. 9 Tiam miaj malamikoj returniĝos malantaŭen
en la tago, kiam mi vokos; Tion mi scias, ke Dio estas
kun mi. 10 Mi gloros vorton de Dio; Mi gloros vorton
de la Eternulo. 11 Dion mi fidas, mi ne timas: Kion
faros al mi homo? 12 Mi faris al Vi, ho Dio, promesojn,
Mi plenumos al Vi dankoferojn. 13 Ĉar Vi savis mian
animon de la morto, Kaj miajn piedojn de falpuŝiĝo,
Por ke mi iradu antaŭ Dio En la lumo de la vivo.

**57** Al la ĥorestro. Por Al-taŝĥet. Verko de David,
kiam li forkuris de Saul en la kavernon. Korfavoru
min, ho Dio, korfavoru min; Ĉar ĉe Vi rifuĝas mia
animo, Kaj sub la ombro de Viaj flugiloj mi min kaŝas,
Ĝis pasos la mizeroj. 2 Mi vokas al Dio Plejalta, Al Dio,
kiu decidas pri mi. 3 Li sendu el la ĉielo kaj helpu min,
Li, kiu hontigas miajn persekutanton; (Sela) Dio sendu
Sian favoron kaj Sian veron. 4 Mia animo estas inter
leonoj; Mi kuŝas inter homidoj avidaj, kies dentoj
estas ponardegoj kaj sagoj, Kaj kies lango estas akra
glavo. 5 Altiĝu super la ĉielo, ho Dio; Via gloro estu
super la tuta tero. 6 Reton ili metis antaŭ miaj piedoj;
Ili premis mian animon; Ili fosis antaŭ mi foson, Sed
ili mem falis en ĝin. (Sela) 7 Fortika estas mia koro,
ho Dio, fortika estas mia koro; Mi kantos kaj gloros. 8
Vekiĝu, mia honoro, vekiĝu, psaltero kaj harpo; Mi
vekos la matenan ĉielruĝon. 9 Mi gloros Vin, ho mia
Sinjoro, inter la popoloj; Mi prikantos Vin inter la
gentoj. 10 Ĉar granda ĝis la ĉielo estas Via boneco, Kaj
ĝis la nuboj estas Via vero. 11 Altiĝu super la ĉielo, ho
Dio; Via gloro estu super la tuta tero.

**58** Al la ĥorestro. Por Al-taŝĥet. Verko de David.
Ĉu efektive vi parolas veron, vi potenculoj? Ĉu vi
juste juĝas, homidoj? 2 Kontraŭe, en la koro vi faras
krimaĵojn, Sur la tero vi pesas per manoj rabemaj. 3
De la momento de sia naskiĝo la malvirtuloj devojiĝis;
De el la ventro de sia patrino la mensogantoj ekeraris.
4 Ilia veneno estas simila al la veneno de serpento,
De surda aspido, kiu ŝtopas sian orelon, 5 Kiu ne
aŭskultas la vortojn de sorĉistoj, Kiel ajn lertaj en
sia arto. 6 Ho Dio, frakasu iliajn dentojn en ilia buŝo;
Frakasu la makzelojn de la junaj leonoj, ho Eternulo!
7 Ili forverŝiĝu kiel akvo, kiu malaperas; Kiam Li
ĵetos Siajn sagojn, ili estu kiel buĉitaj. 8 Kiel limako
konsumiĝanta ili malaperu, Kiel abortaĵo virina, kiu
ne vidis la sunon; 9 Antaŭ ol viaj kaldronoj eksentos
la dornojn, Ilin vivajn kaj freŝajn pereigu la ventego.
10 Ĝojos la virtulo, kiam li vidos venĝon; Li lavos siajn
piedojn en la sango de la malvirtulo. 11 Kaj la homoj
diros: Ekzistas rekompenco por la virtulo, Ekzistas
Dio, juĝanto sur la tero.

**59** Al la ĥorestro. Por Al-taŝĥet. Verko de David,
kiam Saul sendis, ke oni gardu la domon, por
lin mortigi. Savu min de miaj malamikoj, mia Dio;
Defendu min kontraŭ tiuj, kiuj leviĝis kontraŭ mi. 2
Savu min de la krimuloj, Kaj kontraŭ la sangaviduloj
helpu min. 3 Ĉar jen ili embuskas kontraŭ mia animo,
Fortuloj kolektiĝas kontraŭ mi, Ne por mia krimo kaj
ne por mia peko, ho Eternulo. 4 Sen kulpo de mia
flanko ili kunkuras kaj armiĝas; Rapidu renkonte al
mi, kaj rigardu. 5 Vi, ho Eternulo, Dio Cebaot, Dio
de Izrael, Vekiĝu, por punviziti ĉiujn popolojn; Ne
indulgu ĉiujn krimajn malbonfarantojn. (Sela) 6 Ili
revenas vespere, bojas kiel hundoj, Kaj iras ĉirkaŭ la
urbo. 7 Jen ili parolaĉas per siaj buŝoj; Glavoj estas
sur iliaj lipoj; ĉar kiu, ili diras, aŭdas? 8 Sed Vi, ho
Eternulo, ridos pri ili; Vi mokos ĉiujn popolojn. 9
Ho mia forto, al Vi mi min turnas; Ĉar Dio estas mia
rifuĝo. 10 Mia bona Dio rapidos al mi; Dio vidigos al
mi venĝon sur miaj malamikoj. 11 Ne mortigu ilin,
por ke ne forgesu mia popolo; Disbatu ilin per Via
forto kaj faligu ilin, Ho Sinjoro, nia ŝildo. 12 La parolo
de iliaj lipoj estas peko de iliaj buŝoj; Ili kaptiĝu per
sia malhumileco, Ĉar ili parolas nur pri ĵurrompo kaj
mensogo. 13 Ekstermu ilin en kolerego, ekstermu,
ke ili ne plu ekzistu; Kaj ili eksciu, ke Dio regas ĉe
Jakob, Ĝis la limoj de la mondo. (Sela) 14 Ili revenas
vespere, bojas kiel hundoj, Kaj iras ĉirkaŭ la urbo. 15
Ili vagas pro manĝo, Kaj sen satiĝo pasigas la nokton.
16 Sed mi kantos Vian forton, Kaj matene mi gloros
Vian bonecon; Ĉar Vi estis por mi defendo kaj rifuĝo
En la tago de mia malfeliĉo. 17 Ho mia forto, al Vi
mi kantos; Ĉar Dio estas mia defendo, la Dio de mia
favoro.

**60** Al la ĥorestro. Por ŝuŝan-eduto. Instrua verko
de David, kiam li militis kun Sirio Mezopotamia
kaj kun Sirio Coba, kaj kiam Joab, revenante, batis
dek du mil Edomidojn en la Valo de Salo. Ho Dio, Vi
forlasis nin, Vi disbatis nin; Vi koleris; rekonsolu nin.
2 Vi ekskuis la teron kaj fendis ĝin; Resanigu ĝiajn
vundojn, ĉar ĝi ŝanceliĝas. 3 Vi sentigis al Via popolo
pezan sorton; Vi trinkigis al ni vinon senkonsciigan. 4
Sed Vi donis standardon al tiuj, kiuj Vin timas, Por ke
ili ĝin levu pro la vero. (Sela) 5 Por ke liberiĝu Viaj

amatoj, Helpu per Via dekstra mano, kaj aŭskultu
min. 6 Dio diris en Sia sanktejo: Mi triumfos; Mi
dividos Ŝeĥemon, kaj la valon Sukot Mi mezuros.
7 Al Mi apartenas Gilead, al Mi apartenas Manase;
Efraim estas la forto de Mia kapo, Jehuda estas Mia
sceptro. 8 Moab estas Mia lavopelvo; Sur Edomon
Mi ĵetos Mian ŝuon; Super Filiŝtujo Mi triumfe krios.
9 Kiu enkondukos min en fortikigitan urbon? Kiu
alkondukos min ĝis Edom? 10 Ĉu ne Vi, ho Dio, forlasis
nin? Vi ne eliras, ho Dio, kun niaj militistaroj. 11
Donu al ni helpon kontraŭ la malamiko; Vanta estas
helpo de homo. 12 Kun Dio ni faros heroaĵojn; Kaj Li
dispremos niajn malamikojn.

61 Al la Ĥorestro. Por korda instrumento. De David.
Aŭskultu, ho Dio, mian krion; Atentu mian
preĝon. 2 De la fino de la tero mi vokas al Vi en
la malĝojo de mia koro: Sur rokon tro altan por mi
suprenkonduku min. 3 Ĉar Vi estis mia rifuĝejo,
Fortika turo kontraŭ malamiko. 4 Lasu min loĝi eterne
en Via tendo, Havi rifuĝon sub la kovro de Viaj flugiloj.
(Sela) 5 Ĉar Vi, ho Dio, aŭdis miajn promesojn; Vi
donis al mi la heredon de tiuj, kiuj timas Vian nomon.
6 Aldonu tagojn al la tagoj de la reĝo, Ke liaj jaroj
daŭru multajn generaciojn. 7 Li restu eterne antaŭ
Dio; Boneco kaj vero laŭ Via volo lin gardu. 8 Tiel
mi prikantos Vian nomon eterne, Plenumante miajn
promesojn ĉiutage.

62 Al la Ĥorestro. Por Jedutun. Psalmo de David. Nur
al Dio esperas mia animo; De Li venas mia savo.
2 Nur Li estas mia fortikaĵo kaj mia savo, mia rifuĝejo;
Mi ne tute renversiĝos. 3 Ĝis kiam vi insidos kontraŭ
viro kaj ĉiuj vi penos faligi lin, Kiel kliniĝintan muron,
kiel barilon kadukan? 4 Ili meditas nur pri tio, ke ili
deĵetu lin de lia altaĵo; Plaĉas al ili malvero; Per la
buŝo ili benas, kaj interne ili malbenas. (Sela) 5 Nur
Dion fidu, mia animo; Ĉar Li estas mia espero. 6 Nur
Li estas mia fortikaĵo kaj mia savo, mia rifuĝejo; Mi ne
renversiĝos. 7 En Dio estas mia savo kaj mia honoro;
Mia forta roko, mia ŝirmo estas en Dio. 8 Fidu Lin en
ĉiu tempo, ho popolo; Elverŝu antaŭ Li vian koron:
Dio estas nia defendo. (Sela) 9 Nur vantaĵo estas la
malaltranguloj, malveraĵo estas la altranguloj; Metitaj
sur pesilon, ili ĉiuj estas malpli ol vantaĵo. 10 Ne fidu
perfortaĵon, kaj rabitaĵon ne fidu vane; Kiam kreskos
riĉeco, ne atentu ĝin per via koro. 11 Unu vorton diris
Dio, Dufoje mi ĝin aŭdis, Ke la forto estas ĉe Dio. 12
Kaj Vi, ho mia Sinjoro, havas favorkorecon; Ĉar Vi
redonas al homo laŭ liaj faroj.

63 Psalmo de David, kiam li estis en la dezerto de
Judujo. Ho Dio, mia Dio, Vin mi fervore serĉas;
Soifas pri Vi mia animo, sopiras pri Vi mia karno, En
lando seka, sensuka, kaj senakva. 2 Mi volus vidi Vin
en Via sanktejo, Vidi Vian forton kaj gloron. 3 Ĉar Via
favoro estas pli bona ol vivo; Miaj lipoj Vin gloras. 4
Tiel mi Vin gloradus en la daŭro de mia vivo, Levadus
miajn manojn pro Via nomo. 5 Kvazaŭ de graso kaj
oleo satiĝus mia animo, Kaj per vortoj de kanto Vin
gloradus mia buŝo. 6 Kiam mi rememoras Vin sur mia
lito, En ĉiuj partoj de la nokto mi meditas pri Vi. 7 Ĉar
Vi estis por mi helpo, Kaj en la ombro de Viaj flugiloj
mi ĝojas. 8 Mia animo algluiĝis al Vi; Min subtenas
Via dekstra mano. 9 Kaj tiuj, kiuj penas pereigi mian
animon, Iros en la profundon subteran. 10 Ili estos
mortigitaj per glavo, Fariĝos akiro de vulpoj. 11 Kaj la
reĝo ĝojos per Dio; Triumfos ĉiu, kiu ĵuras al Li; Ĉar
ŝtopiĝos la buŝo de tiuj, kiuj parolas malveron.

64 Al la Ĥorestro. Psalmo de David. Aŭdu, ho Dio,
mian krion en mia malĝojo; De la teruro pri
malamiko gardu mian vivon. 2 Ŝirmu min kontraŭ la
konspiro de maliculoj, Kontraŭ la amaso de krimuloj,
3 Kiuj akrigis sian langon kiel glavon, Direktis vortojn
maldolĉajn, kvazaŭ siajn sagojn, 4 Por pafi kaŝe
kontraŭ senkulpulon; Subite ili pafas kontraŭ lin kaj
ne timas. 5 Ili fortikigas sin en malbona intenco, Ili
konsiliĝas, por meti sekrete retojn; Ili diras: Kiu ilin
vidos? 6 Ili elpensas krimojn, kaŝas ilin tre zorge
interne en si, En la profundeco de la koro. 7 Sed Dio
pafos kontraŭ ilin; Per sago subita ili estos frapitaj. 8
Kaj ili falos per sia propra lango; Ĉiuj, kiuj ilin vidos,
balancos la kapon. 9 Kaj ektimos ĉiuj homoj, Kaj ili
rakontos la agon de Dio Kaj komprenos Liajn farojn.
10 La virtulo ĝojos per la Eternulo, kaj fidos Lin; Kaj
triumfos ĉiuj, kiuj havas pian koron.

65 Al la Ĥorestro. Psalmo de David. Kanto. Vin oni
fidas kaj gloras, ho Dio, en Cion; Kaj al Vi oni
plenumas promesojn. 2 Al Vi, kiu aŭskultas preĝon,
Venas ĉiu karno. 3 Krimaĵoj min premas; Niajn pekojn
Vi pardonos. 4 Feliĉa estas tiu, kiun Vi elektas kaj
alproksimigas al Vi, Ke li loĝu en Viaj kortoj. Ni satiĝu
per la bonaĵoj de Via domo, De Via sankta templo.
5 Per timindaĵoj Vi respondas al ni en justeco, Ho

Dio de nia savo, Espero de ĉiuj finoj de la tero kaj de
malproksimaj maroj, 6 Vi, kiu fortigas montojn per
Sia forto, Kiu estas zonita per potenco, 7 Kiu kvietigas
la bruadon de maroj, la bruadon de iliaj ondoj, Kaj la
tumulton de popoloj. 8 Kaj ektimos pro Viaj mirakloj
la loĝantoj de la limoj; La lokojn de la sunleviĝo kaj
sunsubiro Vi ĝojigas. 9 Vi memoras pri la tero, Kaj Vi
donas al ĝi akvon, kaj Vi forte ĝin riĉigas; La torento
de Dio estas plena de akvo; Vi pretigas ĝian panon, ĉar
tiel Vi ĝin aranĝis. 10 Vi donas trinkon al ĝiaj sulkoj,
Vi ebenigas ĝiajn bulojn; Per pluvego Vi ĝin moligas,
Vi benas ĝiajn kreskaĵojn. 11 Vi kronas la jaron per Via
bono; Kaj la signoj de Viaj piedoj gutas per graso. 12
La stepoj de dezerto grasiĝas, Kaj la montetoj zoniĝas
per ĝojo. 13 La herbejoj kovriĝas per brutaroj, Kaj la
kampoj vestiĝas per greno; Ili ĝojas kaj kantas.

**66** Al la Ĥorestro. Kanto-psalmo. Ĝoje kriu al Dio
tuta la tero. 2 Muziku la gloron de Lia nomo, Faru
honoron al Lia gloro. 3 Diru al Dio: Kiel timindaj estas
Viaj faroj! Pro Via granda forto kaŝiĝas antaŭ Vi Viaj
malamikoj. 4 La tuta tero kliniĝas antaŭ Vi kaj kantas
al Vi, Kantas Vian nomon. (Sela) 5 Venu, kaj rigardu
la farojn de Dio, Kiu estas timinda pro Siaj faroj inter
la homidoj. 6 Li faris el maro sekan teron; Riveron oni
transpaŝis piede; Tie ni ĝojis pro Li. 7 Li regas per Sia
potenco eterne; Liaj okuloj rigardas la popolojn; La
ribelantoj ne leviĝu. (Sela) 8 Laŭdu, ho popoloj, nian
Dion, Kaj laŭte aŭdigu Lian gloron. 9 Li donis vivon al
nia animo, Kaj ne lasis falŝanceliĝi nian piedon. 10
Ĉar Vi esploris nin, ho Dio; Vi refandis nin, kiel oni
refandas arĝenton. 11 Vi enirigis nin en kaptilon, Vi
metis ŝarĝon sur niajn lumbojn; 12 Vi rajdigis homojn
sur niaj kapoj; Ni trapasis fajron kaj akvon, Sed Vi
elirigis nin en bonstaton. 13 Mi eniros en Vian domon
kun bruloferoj; Mi plenumos al Vi miajn promesojn,
14 Kiujn eligis miaj lipoj kaj elparolis mia buŝo, Kiam
mi estis en premo. 15 Grasajn bruloferojn mi alportos
al Vi kun fumo de virŝafoj; Mi oferos bovidojn kaj
kaprojn. (Sela) 16 Venu, aŭskultu, ĉiuj, kiuj timas Dion;
Kaj mi rakontos, kion Li faris por mia animo. 17 Al
Li mi vokis per mia buŝo, Kaj Lia glorado estis sub
mia lango. 18 Se mi vidus maljustaĵon en mia koro,
Mia Sinjoro min ne aŭskultus; 19 Sed Dio aŭskultis, Li
atentis la voĉon de mia preĝo. 20 Glorata estu Dio,
Kiu ne forpuŝis mian preĝon kaj ne rifuzis al mi Sian
bonecon.

**67** Al la Ĥorestro. Por kordaj instrumentoj. Psalmo-
kanto. Dio nin korfavoru kaj benu; Li aperigu al
ni Sian luman vizaĝon. (Sela) 2 Oni ekkonu sur la tero
Vian vojon, En ĉiuj popoloj Vian savon. 3 Danku Vin
popoloj, ho Dio, Danku Vin ĉiuj popoloj. 4 Ĝoju kaj
kantu gentoj, Ĉar Vi juĝas popolojn juste, Kaj gentojn
sur la tero Vi regas. (Sela) 5 Danku Vin popoloj, ho
Dio, Danku Vin ĉiuj popoloj. 6 La tero donis sian
frukton; Benos nin Dio, nia Dio. 7 Benos nin Dio; Kaj
respektu Lin ĉiuj limoj de la tero.

**68** Al la Ĥorestro. De David. Psalmo-kanto. Leviĝu
Dio, disĵetiĝu Liaj malamikoj, Kaj forkuru Liaj
malamantoj for de Li. 2 Kiel dispeliĝas fumo, tiel Vi
ilin dispelu; Kiel vakso fandiĝas de fajro, tiel pereu la
malvirtuloj antaŭ Dio. 3 Sed la virtuloj ĝojos, gajos
antaŭ Dio, Kaj triumfos ĝojege. 4 Kantu al Dio, muziku
al Lia nomo, Gloru la veturantan sur la nuboj; Lia
nomo estas JAH; ĝoju antaŭ Li. 5 Patro de la orfoj kaj
juĝanto de la vidvinoj Estas Dio en Sia sankta loĝejo.
6 Dio donas domon al soluloj, Elirigas malliberulojn
en liberecon; Nur la ribeluloj restas en dezerto. 7 Ho
Dio, kiam Vi iris antaŭ Via popolo, Kiam Vi paŝis en la
dezerto, (Sela) 8 La tero tremis kaj la ĉielo fandiĝis de
la vizaĝo de Dio, Tiu Sinaj tremis de la vizaĝo de Dio,
Dio de Izrael. 9 Bonfaran pluvon Vi verŝis, ho Dio, sur
Vian heredon, Kaj kiam ĝi perdis la fortojn, Vi ĝin
vigligis. 10 Via gento ekloĝis tie; Vi pretigis per Via
boneco ĉion por la malriĉulo, ho Dio. 11 Mia Sinjoro
elparolas vorton; Kaj grandega estas la nombro de la
anoncantinoj. 12 Reĝoj de armeoj forkuras, forkuras;
Kaj la hejmesidantino dividas akiron. 13 Kiam vi kuŝas
inter brutejoj, La flugiloj de kolombo estas kovritaj de
arĝento, Kaj ĝiaj plumoj de brilanta oro. 14 Kiam la
Plejpotenculo dismetis reĝojn sur la tero, Ĝi brilis kiel
neĝo sur Calmon. 15 Monto de Dio estas la monto
Baŝana, Monto multepinta estas la monto Baŝana. 16
Kial vi, montoj multepintaj, envie rigardas la monton,
Kiun Dio elektis, por sidi sur ĝi, Kaj sur kiu la Eternulo
loĝos eterne? 17 Da veturiloj de Dio ekzistas multaj
miloj da miloj; Inter ili estas mia Sinjoro sur la sankta
Sinaj. 18 Vi supreniris alten, alkondukis kaptitojn,
Prenis donacojn de homoj, Kaj eĉ ribeluloj povas loĝi
ĉe la Eternulo, la Dio. 19 Glorata estu mia Sinjoro,
ĉiutage Li zorgas pri ni; Dio estas nia savo. (Sela) 20
Dio estas por ni Dio de savo, Kaj la Eternulo, mia
Sinjoro, savas de la morto. 21 Jes, Dio frakasas la

kapon de Siaj malamikoj, La multeharan kranion
de tiuj, kiuj obstinas en siaj pekoj. 22 Mia Sinjoro
diris: El Baŝan Mi alkondukos, Mi alkondukos el la
profundeco de la maro; 23 Por ke vi trempu vian
piedon en sango, Kaj la lango de viaj hundoj ĝuu de
viaj malamikoj. 24 Oni vidis Vian iron, ho Dio, La iron
de mia Dio, mia Reĝo, en la sanktejo. 25 Antaŭe iris
kantistoj, poste kordinstrumentistoj, En la mezo de
knabinoj tamburinistinoj. 26 En la kunvenoj gloru
Dion, mian Sinjoron, Vi, devenantoj de Izrael. 27 Tie
estas Benjamen, la plej juna, ilia reganto; La princoj
de Jehuda kaj iliaj amasoj; La princoj de Zebulun kaj
de Naftali. 28 Via Dio destinis vian forton. Fortikigu,
ho Dio, tion, kion Vi faris por ni. 29 Pro Via templo
en Jerusalem La reĝoj alportos al Vi donacojn. 30
Kvietigu la beston en la kanoj, La aron da bovoj kun la
bovidoj, Popoloj, kiuj humiliĝas pro pecoj da arĝento.
Li dispelas la popolojn, kiuj deziras batalojn. 31 Venos
eminentuloj el Egiptujo; Etiopujo rapidos, por etendi
siajn manojn al Dio. 32 Regnoj de la tero, kantu al
Dio, Muziku al mia Sinjoro, (Sela) 33 Kiu regas en la
ĉielo de la eternaj ĉieloj. Jen Li tondras per Sia voĉo,
forta voĉo. 34 Gloru la forton de Dio! Super Izrael
estas Lia majesto, Kaj Lia potenco estas en la nuboj.
35 Timinda Vi estas, ho Dio, en Via sanktejo. Li estas
la Dio de Izrael, Li donas forton kaj potencon al la
popolo. Glorata estu Dio.

**69** Al la ĥorestro. Por ŝoŝanoj. De David. Savu min,
ho Dio; Ĉar la akvoj venis ĝis mia animo. 2 Mi
profundiĝis en profundan marĉon, kaj mi ne havas,
sur kio stari; Mi enfalis en la profundon de la akvo, kaj
la fluo min forportas. 3 Mi senfortiĝis de mia kriado,
sekiĝis mia gorĝo; Laciĝis miaj okuloj de la atendado
de mia Dio. 4 Pli multaj ol la haroj de mia kapo estas
miaj senkaŭzaj malamantoj; Fortiĝis miaj premantoj,
miaj maljustaj malamikoj; Kion mi ne rabis, tion mi
devas fordoni. 5 Ho Dio, Vi scias mian malsaĝecon; Kaj
miaj kulpoj ne estas kaŝitaj por Vi. 6 Ne hontiĝu per
mi tiuj, kiuj esperas al Vi, ho mia Sinjoro, Eternulo
Cebaot! Ne hontiĝu per mi tiuj, kiuj Vin serĉas, ho
Dio de Izrael! 7 Ĉar pro Vi mi portas malhonoron,
Honto kovras mian vizaĝon. 8 Mi fariĝis fremda por
miaj fratoj, Nekonato por la filoj de mia patrino. 9 Ĉar
fervoro pri Via domo min konsumis, Kaj la insultoj de
Viaj insultantoj falis sur min. 10 Kaj mi ploras, mia
animo estas en fasto, Kaj pri tio oni min hontigas. 11
Kiel veston mi metis sur min sakon, Kaj mi fariĝis
moka ekzemplo por ili. 12 Parolas pri mi la sidantoj ĉe
la pordego, Kaj la drinkantoj kantas pri mi. 13 Kaj mi
preĝas al Vi, ho Eternulo, en favora tempo; Ho Dio,
pro Via granda boneco respondu al mi per Via vera
helpo. 14 Eligu min el la ŝlimo, ke mi ne dronu; Mi
estu savita kontraŭ miaj malamantoj kaj el profunda
akvo. 15 Ne fortiru min fluo de la akvo, Ne englutu
min profundo, Kaj abismo ne fermu super mi sian
buŝon. 16 Aŭskultu min, ho Eternulo, ĉar bona estas
Via favorkoreco; Laŭ Via kompatemeco turnu Vin al
mi. 17 Kaj ne kaŝu antaŭ Via sklavo Vian vizaĝon, ĉar
mi suferas; Rapidu, aŭskultu min. 18 Alproksimiĝu al
mia animo, savu ĝin; Spite miajn malamikojn liberigu
min. 19 Vi scias mian malhonoron kaj mian honton kaj
mian mokatecon; Antaŭ Vi estas ĉiuj miaj premantoj.
20 Honto rompis mian koron, kaj mi senfortiĝis; Mi
atendis kompatantojn, sed ili forestis; Konsolantojn,
sed mi ne trovis. 21 Kaj ili donis al mi por manĝo
galon, Kaj en mia soifo ili trinkigis al mi vinagron. 22
Ilia tablo antaŭ ili fariĝu reto, Kaj ilia prospero fariĝu
kaptilo. 23 Mallumiĝu iliaj okuloj, ke ili ne vidu; Kaj
iliajn lumbojn malfortigu por ĉiam. 24 Verŝu sur ilin
Vian furiozon, Kaj la flamo de Via kolero ilin ataku.
25 Ilia loĝejo dezertiĝu, En iliaj tendoj ne ekzistu
loĝanto. 26 Ĉar tiun, kiun Vi frapis, ili persekutas,
Kaj la suferojn de Viaj batitoj ili rakontas. 27 Aldonu
kulpon al ilia kulpo, Ke ili ne atingu Vian bonecon. 28
Ili estu elstrekitaj el la libro de vivantoj, Kaj ili ne estu
skribitaj kune kun virtuloj. 29 Sed mi estas malriĉa
kaj suferanta; Via helpo min defendu, ho Dio. 30 Mi
gloros la nomon de Dio per kanto, Kaj mi rakontos en
danko Lian grandecon. 31 Kaj ĝi estos pli agrabla al la
Eternulo, Ol bovo aŭ bovido kun kornoj kaj fendohavaj
hufoj. 32 Vidos humiluloj kaj ĝojos! Ho serĉantoj de
Dio, via koro reviviĝu. 33 Ĉar la Eternulo aŭskultas
humilulojn, Kaj Siajn malliberulojn Li ne malŝatas. 34
Gloru Lin la ĉielo kaj la tero, La maroj, kaj ĉio, kio en
ili moviĝas. 35 Ĉar Dio helpos Cionon kaj konstruos la
urbojn de Judujo, Ke oni tie loĝos kaj ilin heredos. 36
Kaj la idaro de Liaj sklavoj ĝin heredos, Kaj la amantoj
de Lia nomo loĝos en ĝi.

**70** Al la ĥorestro. De David. Pro memoro. Volu, ho
Dio, savi min; Ho Eternulo, rapidu helpi min. 2
Hontiĝu kaj konfuziĝu tiuj, kiuj serĉas mian animon;
Retiriĝu kaj estu mokataj tiuj, kiuj deziras al mi

malbonon. 3 Kun honto iru returne tiuj, Kiuj diras al
mi: Ha, ha! 4 Gaju kaj ĝoju pro Vi ĉiuj Viaj serĉantoj;
Kaj la amantoj de Via savo diru ĉiam: Granda estas
Dio. 5 Kaj mi estas mizera kaj malriĉa; Ho Dio, rapidu
al mi. Vi estas mia helpo kaj mia savanto; Ho Eternulo,
ne malrapidu.

71 Vin, ho Eternulo, mi fidas: Mi neniam estu
hontigita. 2 Per Via justeco savu min kaj liberigu
min; Klinu al mi Vian orelon, kaj helpu min. 3 Estu
por mi fortika roko, kien mi povus ĉiam veni, Kiun Vi
destinis por mia savo; Ĉar Vi estas mia roko kaj mia
fortikaĵo. 4 Ho mia Dio, liberigu min el la mano de
malbonulo, El la mano de krimulo kaj premanto. 5
Ĉar Vi estas mia espero, ho mia Sinjoro; La Eternulo
estas mia fido de post mia juneco. 6 Vin mi fidis de la
embrieco, De la ventro de mia patrino Vi estas mia
protektanto; Vin mi ĉiam gloros. 7 Mirindaĵo mi estis
por multaj; Kaj Vi estas mia forta rifuĝejo. 8 Mia buŝo
estas plena de glorado por Vi, Ĉiutage de Via majesto.
9 Ne forpuŝu min en la tempo de maljuneco; Kiam
konsumiĝos miaj fortoj, tiam ne forlasu min. 10 Ĉar
miaj malamikoj parolas pri mi, Kaj tiuj, kiuj insidas
kontraŭ mia animo, konsiliĝas inter si, 11 Dirante:
Dio lin forlasis; Persekutu kaj kaptu lin, ĉar neniu
lin savos. 12 Ho Dio, ne malproksimiĝu de mi; Ho
mia Dio, rapidu, por helpi min. 13 Estu hontigitaj kaj
malaperu la persekutantoj de mia animo; De honto
kaj malhonoro estu kovritaj tiuj, kiuj deziras al mi
malbonon. 14 Kaj mi ĉiam fidos Kaj ĉiam pligrandigos
Vian gloron. 15 Mia buŝo rakontos Vian justecon,
Ĉiutage Vian helpon, Ĉar mi ne povus ĉion elkalkuli.
16 Mi gloros la fortojn de mia Sinjoro, la Eternulo; Mi
rakontos nur Vian justecon. 17 Ho Dio, Vi instruis min
detempe de mia juneco; Kaj ĝis nun mi predikas pri
Viaj mirakloj. 18 Ankaŭ ĝis la maljuneco kaj grizeco
ne forlasu min, ho Dio, Ĝis mi rakontos pri Via brako
al la estonta generacio, Pri Via forto al ĉiuj venontoj.
19 Via justeco, ho Dio, estas tre alta; En la grandaj
faroj, kiujn Vi plenumis, Ho Dio, kiu Vin egalas? 20
Vi vidigis al mi grandajn kaj kruelajn suferojn, Sed
Vi denove min vivigis, Kaj el la abismoj de la tero
Vi denove min eligis. 21 Vi pliigas mian grandecon
Kaj denove min konsolas. 22 Kaj mi gloros Vin per
psaltero por Via fideleco, ho mia Dio; Mi kantos al Vi
per harpo, Ho Sanktulo de Izrael! 23 Ĝojas miaj lipoj,
kiam mi kantas al Vi; Kaj mia animo, kiun Vi savis. 24
Kaj mia lango ĉiutage rakontas Vian justecon; Ĉar
hontigitaj kaj malhonoritaj estas tiuj, kiuj deziras al
mi malbonon.

72 Pri Salomono. Ho Dio, Vian juĝon donu al la reĝo
Kaj Vian justecon al la reĝido. 2 Li juĝu Vian
popolon kun vero Kaj Viajn prematojn kun justeco.
3 La montoj alportu al la popolo pacon, Ankaŭ la
montetoj, per justeco. 4 Li juĝu la prematojn en la
popolo, Li savu la filojn de senhavulo, Kaj li dispremu
la premanton. 5 Oni timu Vin tiel longe, kiel ekzistos
la suno kaj la luno, De generacioj al generacioj. 6 Li
malleviĝu, kiel pluvo sur falĉitan herbejon; Kiel gutoj,
kiuj malsekigas la teron. 7 En liaj tagoj floru virtulo kaj
granda paco, Ĝis ne plu ekzistos la luno. 8 Li regu de
maro ĝis maro Kaj de la Rivero ĝis la finoj de la tero. 9
Kliniĝu antaŭ li la dezertanoj, Kaj liaj malamikoj leku
polvon. 10 La reĝoj de Tarŝiŝ kaj de la insuloj alportu
donacojn; La reĝoj de Ŝeba kaj Seba venigu donojn. 11
Kliniĝu antaŭ li ĉiuj reĝoj; Ĉiuj popoloj lin servu. 12
Ĉar li savos ploregantan malriĉulon Kaj senhelpan
mizerulon. 13 Li estos favorkora por malriĉulo kaj
senhavulo, Kaj li savos la animojn de mizeruloj. 14
De malico kaj krimo li savos iliajn animojn; Kaj kara
estos ilia sango en liaj okuloj. 15 Kaj li vivu, kaj oni
donu al li el la oro de Ŝeba; Kaj oni ĉiam preĝu por li,
kaj ĉiutage oni lin benu. 16 Estu multe da greno en la
lando; Sur la supro de la montoj ĝiaj spikoj ondiĝu kiel
Lebanon; Kaj en la urboj ĉio floru, kiel herbo sur la
tero. 17 Lia nomo estu eterna; Tiel longe, kiel ekzistas
la suno, kresku lia nomo; Ĉiuj popoloj sin benu per li
kaj gloru lin. 18 Glorata estu Dio la Eternulo, Dio de
Izrael, Kiu sola faras miraklojn. 19 Kaj laŭdata estu
Lia glora nomo eterne; Kaj Lia gloro plenigu la tutan
teron. Amen, kaj amen! 20 Finiĝis la preĝoj de David,
filo de Jiŝaj.

73 Psalmo de Asaf. Jes, bona estas Dio por Izrael,
Por tiuj, kiuj havas puran koron. 2 Sed mi —
apenaŭ ne falŝanceliĝis miaj piedoj, Preskaŭ elglitis
miaj paŝoj. 3 Ĉar mi ĉagreniĝis pro la fanfaronuloj,
Vidante la bonstaton de la malvirtuloj. 4 Ĉar ili ne
havas suferojn de morto, Kaj iliaj fortoj estas fortikaj.
5 Ili ne partoprenas en la zorgoj de homoj, Kaj ili ne
suferas kun aliaj homoj. 6 Tial ilian kolon ĉirkaŭvolvis
fiereco, Kaj perforteco ilin vestas kiel ornamo. 7 Pro
graso elmetiĝis iliaj okuloj, Superbordiĝis en ilia koro
la intencoj. 8 Ili mokas, ili parolas malbonintence

pri premado; Ili parolas de alte. **9** Kontraŭ la ĉielon
ili levas sian buŝon, Kaj ilia lango promenas sur la
tero. **10** Tial tien ankaŭ iras Lia popolo, Kaj ili akvon
ĉerpas abunde. **11** Kaj ili diras: Kiel Dio scias? Kaj ĉu la
Plejaltulo komprenas? **12** Jen tiuj estas malvirtuloj,
Kaj ili estas feliĉuloj de la mondo kaj atingis riĉecon!
**13** Nur vane mi purigis mian koron Kaj lavis per
senkulpeco miajn manojn, **14** Kaj mi turmentiĝas
ĉiutage Kaj mi suferas punon ĉiumatene! **15** Se mi
intencus paroli kiel ili, Tiam mi fariĝus perfida al la
generacio de Viaj filoj. **16** Mi meditis, por kompreni
ĉi tion; Sed ĝi estis malfacila en miaj okuloj, **17** Ĝis
mi venis en la sanktejon de Dio Kaj ekkomprenis la
finon de tio. **18** Vi starigas ilin sur glitiga loko; Kaj
Vi ĵetas ilin en pereon. **19** Kiel momente ili ruiniĝis!
Pereis, malaperis de subita teruro! **20** Simile al sonĝo
post la vekiĝo, Vi, ho mia Sinjoro, en kolero tute
sensignifigas ilian bildon. **21** Kiam bolis mia koro Kaj
turmentiĝis mia internaĵo, **22** Tiam mi estis senklerulo
kaj mi ne komprenis; Mi estis kiel bruto antaŭ Vi. **23**
Sed mi ĉiam estas apud Vi; Vi tenas min je la dekstra
mano. **24** Per Via konsilo Vi min kondukas, Kaj poste
Vi akceptas min kun honoro. **25** Kiu estas por mi en
la ĉielo? Kaj krom Vi mi nenion volas sur la tero. **26**
Konsumiĝas mia karno kaj mia koro; Sed la fortikaĵo
de mia koro kaj mia parto estas Dio por eterne. **27** Jen
tiuj, kiuj malproksimiĝas de Vi, pereas; Vi ekstermas
ĉiun, kiu perfidiĝis al Vi. **28** Sed al mi estas bone, ke
mi estas proksima al Dio; Sur mian Sinjoron, sur la
Eternulon, mi metis mian fidon, Por rakonti ĉiujn
Viajn farojn.

**74** Instruo de Asaf. Kial, ho Dio, Vi forpuŝis nin por
ĉiam? Kial fumas Via kolero kontraŭ la ŝafoj de
Via paŝtejo? **2** Rememoru Vian komunumon, kiun
Vi aĉetis en la tempo antikva, La genton de Via
heredo, kiun Vi liberigis, Ĉi tiun monton Cion, sur
kiu Vi loĝiĝis. **3** Direktu Viajn paŝojn al la eternaj
ruinoj, Al ĉio, kion detruis malamiko en la sanktejo.
**4** Krias Viaj malamikoj en Via domo, Metis tie siajn
signojn. **5** Oni vidas, kiel ili levas la hakilojn Kontraŭ
la lignajn plektaĵojn. **6** Kaj nun ĉiujn ĝiajn skulptaĵojn
Ili dishakas per hakilo kaj marteloj. **7** Ili bruligis per
fajro Vian sanktejon, Malhonore alterigis la loĝejon
de Via nomo. **8** Ili diris en sia koro: Ni ruinigos ilin
tute; Ili forbruligis ĉiujn domojn de Dio en la lando. **9**
Niajn signojn ni ne vidis; Jam ne ekzistas profeto, Kaj
neniu ĉe ni scias, kiel longe tio daŭros. **10** Kiel longe,
ho Dio, mokos la premanto? Ĉu eterne la malamiko
insultos Vian nomon? **11** Kial Vi retenas Vian brakon
kaj Vian dekstran manon? Ekstermu ilin el Via basko.
**12** Dio estas ja mia Reĝo de antikve, Li faras savon
sur la tero. **13** Vi disŝiris per Via forto la maron, Vi
rompis la kapojn de balenoj en la akvo; **14** Vi disbatis
la kapojn de la levjatano, Vi donis ĝin por manĝo
al la bestoj de la dezerto; **15** Vi elfendis fonton kaj
torenton, Vi elsekigis potencajn riverojn. **16** Al Vi
apartenas la tago, kaj al Vi apartenas la nokto; Vi
aranĝis lumon kaj sunon; **17** Vi difinis ĉiujn limojn
de la tero; La someron kaj la vintron Vi aranĝis. **18**
Rememoru tion, ke malamiko insultas la Eternulon
Kaj popolo malsaĝa malhonoras Vian nomon. **19** Ne
fordonu al sovaĝa besto la animon de Via turto; La
anaron de Viaj mizeruloj ne forgesu por ĉiam. **20**
Rememoru la interligon, Ĉar ĉiuj mallumaj lokoj de la
tero estas plenaj de rabejoj. **21** La suferanto ne reiru
hontigita; Malriĉulo kaj mizerulo gloru Vian nomon.
**22** Leviĝu, ho Dio, defendu Vian aferon; Rememoru la
malhonoron, kiun malsaĝulo faras al Vi ĉiutage. **23** Ne
forgesu la krion de Viaj malamikoj; La bruo de tiuj,
kiuj leviĝis kontraŭ Vi, konstante kreskas.

**75** Al la ĥorestro. Por Al-taŝĥet. Psalmo de Asaf.
Kanto. Ni gloras Vin, ho Dio, ni gloras Vin;
Proksima estas Via nomo; Oni rakontas Viajn
miraklojn. **2** Kiam Mi elektos tempon, Mi faros justan
juĝon. **3** Tremas la tero kaj ĉiuj ĝiaj loĝantoj; Mi
fortikigis ĝiajn kolonojn. (Sela) **4** Mi diras al la
fanfaronuloj: Ne fanfaronu; Kaj al la malvirtuloj: Ne
levu kornon; **5** Ne levu supren vian kornon, Ne parolu
kun nefleksebla kolo; **6** Ĉar ne de oriento kaj ne de
okcidento Kaj ne de la dezerto venas alteco. **7** Nur
Dio estas juĝanto; Unu homon Li malaltigas, kaj alian
Li altigas. **8** Ĉar la pokalo estas en la mano de la
Eternulo, Kaj la vino ŝaŭmas, plena de aromaĵo, kaj Li
verŝas el ĝi; Sed nur ĝian feĉon elsuĉos kaj trinkos
ĉiuj malvirtuloj de la tero. **9** Kaj mi eterne predikos,
Mi kantos al la Dio de Jakob. **10** Kaj ĉiujn kornojn de la
malvirtuloj mi rompos; Altiĝos la kornoj de virtulo.

**76** Al la ĥorestro. Por kordaj instrumentoj. Psalmo
de Asaf. Kanto. Dio estas konata en Judujo;
Granda estas Lia nomo en Izrael. **2** En Salem estas
Lia tendo, Kaj Lia loĝejo sur Cion. **3** Tie Li rompis la
sagojn de pafarko, Ŝildon, glavon, kaj militon. (Sela)

4 Vi estas majesta kaj potenca sur la sovaĝbestaj
montoj. 5 Senarmiĝis la fortkoruloj, endormiĝis; Kaj
ĉiuj militistoj restis kvazaŭ sen manoj. 6 De Via
minaco, ho Dio de Jakob, Paraliziĝis rajdisto kaj ĉevalo.
7 Vi, Vi estas timinda; Kaj kiu restos staranta antaŭ
Vi, kiam ekflamas Via kolero? 8 El la ĉielo Vi aŭdigis
juĝon; La tero ektimis kaj eksilentis, 9 Kiam Dio
leviĝis, por juĝi, Por savi ĉiujn humilulojn sur la tero.
(Sela) 10 Ĉar la kolero de homo fariĝas Via gloro, Kiam
Vi zonas Vin per la resto de Via kolero. 11 Faru kaj
plenumu promesojn al la Eternulo, via Dio; Vi ĉiuj,
kiuj Lin ĉirkaŭas, alportu donacojn al la Timindulo. 12
Li humiligis la spiriton de potenculoj; Li estas timinda
por la reĝoj de la tero.

**77** Al la ĥorestro. Por Jedutun. Psalmo de Asaf. Mia
voĉo iras al Dio, kaj mi krias; Mia voĉo iras al
Dio, ke Li aŭskultu min. 2 En la tago de mia suferado
mi serĉas mian Sinjoron; En la nokto mia mano
estas etendita kaj ne malleviĝas; Mia animo ne volas
konsoliĝi. 3 Mi rememoras Dion, kaj mi ĝemas; Mi
meditas, kaj mia spirito malĝojas. (Sela) 4 Vi retenas
la palpebrojn de miaj okuloj; Mi estas frapita, mi ne
povas paroli. 5 Mi meditas pri la tagoj antikvaj, Pri
la jaroj antaŭlonge pasintaj. 6 Mi rememoras en la
nokto mian kanton; Mi parolas kun mia koro, Kaj mia
spirito esploras. 7 Ĉu por eterne mia Sinjoro forpuŝis?
Kaj ĉu Li ne plu favoros? 8 Ĉu por eterne ĉesiĝis
Lia boneco? Ĉu Lia promeso ne plenumiĝos por ĉiuj
generacioj? 9 Ĉu Dio forgesis indulgi? Ĉu Li fermis
en kolero Sian favorkorecon? (Sela) 10 Kaj mi diris:
Tio estas mia aflikto, Ke aliiĝis la dekstra mano de la
Plejaltulo. 11 Mi rememoros la farojn de la Eternulo;
Jes, mi rememoros Viajn antikvajn miraklojn. 12 Mi
meditos pri ĉiuj Viaj faroj, Kaj pri Viaj agoj mi parolos.
13 Ho Dio, en sankteco estas Via vojo; Kiu estas tiel
granda dio, kiel nia Dio? 14 Vi estas tiu Dio, kiu faras
miraklojn; Vi montris Vian forton inter la popoloj.
15 Vi liberigis per Via brako Vian popolon, La filojn
de Jakob kaj Jozef. (Sela) 16 Vidis Vin akvoj, ho Dio,
Vidis Vin akvoj, kaj ili ektremis, Kaj abismoj skuiĝis.
17 Nubegoj verŝis akvon, La ĉielo eligis bruon, Kaj Viaj
sagoj ekflugis. 18 La voĉo de Via tondro estis en la
turnovento, Fulmoj lumigis la mondon; Tremis kaj
ŝanceliĝis la tero. 19 Sur la maro estis Via vojo, Kaj Via
irejo sur grandaj akvoj, Sed Viaj paŝosignoj ne estis
videblaj. 20 Vi kondukis Vian popolon kiel ŝafojn, Per
la mano de Moseo kaj Aaron.

**78** Instruo de Asaf. Atentu, ho mia popolo, mian
instruon; Klinu vian orelon al la paroloj de mia
buŝo. 2 Mi malfermos per sentenco mian buŝon; Mi
eldiros enigmojn el tempo antikva. 3 Kion ni aŭdis
kaj sciiĝis, Kion rakontis al ni niaj patroj, 4 Tion ni
ne kaŝos antaŭ iliaj infanoj, Rakontante al venonta
generacio la gloron de la Eternulo, Kaj Lian potencon,
kaj Liajn miraklojn, kiujn Li faris. 5 Li starigis ateston
en Jakob, Kaj en Izrael Li fiksis leĝon, Pri kiu Li ordonis
al niaj patroj, Ke ili sciigu ĝin al siaj infanoj, 6 Por
ke sciu estonta generacio, la infanoj, kiuj naskiĝos,
Ili leviĝu kaj rakontu al siaj infanoj. 7 Ili metu sian
fidon sur Dion, Kaj ili ne forgesu la farojn de Dio,
Kaj ili plenumu Liajn ordonojn; 8 Kaj ili ne estu, kiel
iliaj patroj, Generacio ribela kaj perfida, Generacio,
kiu ne estis firma per sia koro, Nek fidela al Dio per
sia spirito. 9 La filoj de Efraim, armitaj, portantaj
pafarkon, Turniĝis malantaŭen en tago de batalo; 10
Ili ne plenumis la interkonsenton de Dio, Kaj rifuzis
sekvi Lian instruon; 11 Kaj ili forgesis Liajn farojn,
Kaj Liajn miraklojn, kiujn Li aperigis al ili. 12 Antaŭ
iliaj patroj Li faris miraklojn En la lando Egipta, sur la
kampo Coan. 13 Li fendis la maron kaj pasigis ilin, Kaj
starigis la akvon kvazaŭ muron; 14 Kaj Li kondukis
ilin tage en nubo Kaj la tutan nokton en la lumo de
fajro; 15 Li fendis ŝtonojn en la dezerto, Kaj trinkigis
ilin kvazaŭ el granda abismo; 16 Li eligis riveretojn el
roko, Kaj fluigis akvon kiel riverojn. 17 Sed ili plue
pekis antaŭ Li, Ĉagrenis la Plejaltulon en la dezerto;
18 Kaj ili incitis Dion en sia koro, Petante manĝon pro
sia kaprico; 19 Kaj ili parolis kontraŭ Dio, Kaj diris:
Ĉu Dio povas kovri tablon en la dezerto? 20 Jen Li
frapis rokon, Kaj verŝiĝis akvo kaj ekfluis riveroj: Ĉu
Li povas ankaŭ panon doni? Ĉu Li pretigos ankaŭ
viandon por Sia popolo? 21 Tial la Eternulo, aŭdinte,
flamiĝis; Kaj fajro ekbrulis kontraŭ Jakob, Kaj leviĝis
kolero kontraŭ Izrael; 22 Ĉar ili ne kredis je Dio Kaj
ne fidis Lian savon. 23 Kaj Li ordonis el supre al la
nuboj, Kaj Li malfermis la pordojn de la ĉielo; 24 Kaj
Li pluvigis al ili manaon, por manĝi, Kaj Li donis al ili
ĉielan grenon. 25 Panon de potenculoj ĉiu manĝis; Li
sendis al ili manĝon satege. 26 Li kurigis tra la ĉielo
venton orientan, Kaj per Sia forto Li aperigis venton
sudan; 27 Kaj Li pluvigis sur ilin viandon kiel polvon,

Kaj flugilajn birdojn kiel apudmaran sablon; 28 Kaj
Li faligis ĉion mezen de ilia tendaro, Ĉirkaŭe de iliaj
loĝejoj. 29 Kaj ili manĝis kaj tre satiĝis; Kaj Li venigis
al ili tion, kion ili deziris. 30 Sed kiam ili ankoraŭ ne
forlasis sian deziron Kaj ilia manĝaĵo estis ankoraŭ
en ilia buŝo, 31 La kolero de Dio venis sur ilin Kaj
mortigis la plej eminentajn el ili, Kaj la junulojn de
Izrael ĝi faligis. 32 Malgraŭ ĉio ĉi tio ili plue ankoraŭ
pekis Kaj ne kredis je Liaj mirakloj. 33 Kaj Li finigis
iliajn tagojn en vanteco Kaj iliajn jarojn en teruro. 34
Kiam Li estis mortiganta ilin, tiam ili Lin ekserĉis,
Returniĝis kaj fervore vokis Dion; 35 Kaj ili rememoris,
ke Dio estas ilia fortikaĵo Kaj Dio la Plejalta estas ilia
Liberiganto. 36 Sed ili flatis al Li per sia buŝo, Kaj
per sia lango ili mensogis al Li; 37 Ĉar ilia koro ne
estis firma al Li, Kaj ili ne estis fidelaj en Lia interligo.
38 Tamen Li, favorkora, pardonas pekon, kaj Li ne
pereigas, Kaj Li ofte forklinis Sian koleron, Kaj Li ne
eligis Sian tutan furiozon. 39 Kaj Li rememoris, ke ili
estas karno, Vento, kiu iras kaj ne revenas. 40 Kiom da
fojoj ili ĉagrenis Lin en la dezerto Kaj indignigis Lin
en la stepo! 41 Ripete ili incitadis Dion Kaj provokis
la Sanktulon de Izrael. 42 Ili ne rememoris Lian
manon, La tagon, en kiu Li liberigis ilin de premanto,
43 Kiam Li faris en Egiptujo Siajn signojn Kaj Siajn
miraklojn sur la kampo Coan; 44 Kiam Li ŝanĝis en
sangon iliajn riverojn kaj torentojn, Ke ili ne povis
trinki. 45 Li sendis sur ilin insektojn, kiuj ilin manĝis,
Kaj ranojn, kiuj ilin pereigis; 46 Iliajn produktojn
de la tero Li fordonis al vermoj Kaj ilian laboron al
akridoj; 47 Per hajlo Li batis iliajn vinberojn, Kaj iliajn
sikomorojn per frosto; 48 Li elmetis al hajlo iliajn
brutojn, Kaj iliajn paŝtatarojn al fulmo; 49 Li sendis
sur ilin Sian flamantan koleron, Furiozon, malbenon,
kaj mizeron, Taĉmenton da malbonaj anĝeloj. 50 Li
donis liberan vojon al Sia kolero, Ne ŝirmis kontraŭ la
morto ilian animon, Kaj ilian vivon Li transdonis al
pesto; 51 Li mortigis ĉiun unuenaskiton en Egiptujo,
La komencajn fortojn en la tendoj de Ĥam. 52 Kaj Li
kondukis kiel ŝafojn Sian popolon, Kaj Li kondukis ilin
kiel paŝtataron tra la dezerto; 53 Li kondukis ilin en
sendanĝereco, kaj ili ne timis, Kaj iliajn malamikojn
kovris la maro; 54 Kaj Li venigis ilin al Sia sankta
limo, Al tiu monto, kiun akiris Lia dekstra mano;
55 Li forpelis antaŭ ili popolojn, Lote disdonis ilian
heredon, Kaj loĝigis en iliaj tendoj la tribojn de Izrael.
56 Sed ili incitis kaj ĉagrenis Dion la Plejaltan, Kaj
Liajn leĝojn ili ne observis; 57 Ili defalis kaj perfidiĝis,
kiel iliaj patroj, Returniĝis, kiel malfidinda pafarko;
58 Ili kolerigis Lin per siaj altaĵoj, Kaj per siaj idoloj
ili Lin incitis. 59 Dio aŭdis kaj flamiĝis, Kaj forte
ekindignis kontraŭ Izrael; 60 Li forlasis Sian loĝejon
en Ŝilo, La tendon, en kiu Li loĝis inter la homoj;
61 Kaj Li fordonis en malliberecon Sian forton, Kaj
Sian majeston en la manon de malamiko; 62 Kaj Li
elmetis al glavo Sian popolon, Kaj kontraŭ Sia heredo
Li flamiĝis. 63 Ĝiajn junulojn formanĝis fajro, Kaj ĝiaj
junulinoj ne estis prikantataj; 64 Ĝiaj pastroj falis de
glavo, Kaj ĝiaj vidvinoj ne ploris. 65 Sed mia Sinjoro
vekiĝis kiel dormanto, Kiel fortulo, vigligita de vino.
66 Kaj Li batis ĝiajn malamikojn malantaŭen: Eternan
malhonoron Li donis al ili. 67 Kaj Li malŝatis la tendon
de Jozef, Kaj la tribon de Efraim Li ne elektis; 68 Sed
Li elektis la tribon de Jehuda, La monton Cion, kiun
Li ekamis; 69 Kaj Li konstruis Sian sanktejon kiel
monton, Kaj kiel la teron Li fortikigis ĝin por ĉiam. 70
Kaj Li elektis Davidon, Sian sklavon, Kaj Li prenis lin
el la staloj de ŝafoj. 71 De apud la ŝafinoj Li venigis lin,
Por paŝti Lian popolon Jakob kaj Lian heredon Izrael.
72 Kaj li paŝtis ilin laŭ la fideleco de sia koro, Kaj per
lertaj manoj li ilin kondukis.

**79** Psalmo de Asaf. Ho Dio! venis idolanoj en Vian
heredon, Malpurigis Vian sanktan templon, Faris
el Jerusalem ruinojn. 2 La kadavrojn de Viaj sklavoj ili
donis kiel manĝon al la birdoj de la ĉielo, La karnon
de Viaj fideluloj al la bestoj de la tero; 3 Ili verŝis ilian
sangon kiel akvon, ĉirkaŭ Jerusalem, Kaj estis neniu,
kiu ilin enterigus. 4 Ni fariĝis hontindaĵo por niaj
najbaroj, Mokataĵo kaj insultataĵo por niaj ĉirkaŭantoj.
5 Ĝis kiam, ho Eternulo, Vi koleros senĉese? Kaj Via
indigno brulos, kiel fajro? 6 Elverŝu Vian koleron sur
tiujn naciojn, kiuj Vin ne konas, Kaj sur la regnojn, kiuj
ne vokas Vian nomon; 7 Ĉar ili formanĝis Jakobon Kaj
dezertigis lian loĝejon. 8 Ne memoru niajn antaŭajn
krimojn, Rapide atingu nin Via favorkoreco; Ĉar ni
tre konsumiĝis. 9 Helpu nin, ho Dio de nia savo, pro
la gloro de Via nomo; Kaj savu nin kaj pardonu al
ni niajn pekojn pro Via nomo. 10 Kial devas diri la
popoloj: Kie estas ilia Dio? Fariĝu konata inter la
popoloj antaŭ niaj okuloj La venĝo por la verŝita
sango de Viaj sklavoj. 11 Venu al Vi la ĝemoj de la
malliberuloj; Per la grandeco de Via brako liberigu
tiujn, kiuj estas kondamnitaj al morto; 12 Kaj redonu

al niaj najbaroj sepoble en ilian sinon la malhonoron,
Per kiu ili malhonoris Vin, ho mia Sinjoro! 13 Kaj ni,
Via popolo kaj la ŝafoj de Via paŝtataro, Eterne Vin
dankos, De generacio al generacio ni rakontos Vian
gloron.

**80** Al la ĥorestro. Por ŝoŝanoj. Atesto de Asaf.
Psalmo. Ho Paŝtisto de Izrael, aŭskultu; Vi, kiu
kondukas Jozefon, kiel ŝafojn, Vi, kiu sidas sur keruboj,
aperu! 2 Antaŭ Efraim kaj Benjamen kaj Manase veku
Vian forton, Kaj venu, por savi nin. 3 Ho Dio, revenigu
nin kaj lumigu Vian vizaĝon, Por ke ni estu savitaj. 4
Ho Eternulo, Dio Cebaot, Ĝis kiam Vi kolere repuŝos
la preĝon de Via popolo? 5 Vi manĝigis al ili panon
larman, Kaj Vi trinkigis al ili larmojn per granda
mezuro. 6 Vi faris nin objekto de disputo por niaj
najbaroj; Kaj niaj malamikoj nin mokas. 7 Ho Dio
Cebaot! revenigu nin kaj lumigu Vian vizaĝon, Por ke
ni estu savitaj. 8 Vinberbranĉon el Egiptujo Vi elportis,
Vi forpelis popolojn kaj ĝin plantis; 9 Vi purigis lokon
por ĝi; Kaj ĝi profundigis siajn radikojn kaj plenigis la
tutan landon; 10 Montojn kovris ĝia ombro, Kaj ĝiaj
branĉoj fariĝis kiel cedroj de Dio. 11 Ĝi etendis siajn
branĉojn ĝis la maro Kaj siajn branĉetojn ĝis la Rivero.
12 Kial Vi detruis ĝiajn barilojn, Ke ĉiuj pasantoj ĝin
ŝiras? 13 Subfosas ĝin arbara apro, Kaj kampa besto
ĝin mordas. 14 Ho Dio Cebaot, returniĝu; Rigardu el la
ĉielo kaj vidu, kaj rememoru tiun vinbertrunkon, 15
Kaj ŝirmu tion, kion plantis Via dekstra mano, Kaj
la kreskaĵidon, kiun Vi fortikigis por Vi. 16 Ĝi estas
bruligita de fajro, krevinta; De Via minaca vizaĝo ili
pereis. 17 Via brako estu super la viro de Via dekstra
mano, Super la homido, kiun Vi fortikigis por Vi. 18
Kaj ni ne foriros de Vi; Vivigu nin, kaj ni vokos Vian
nomon. 19 Ho Eternulo, Dio Cebaot! revenigu nin,
lumigu Vian vizaĝon, Por ke ni estu savitaj.

**81** Al la ĥorestro. Por la gitito. De Asaf. Laŭte kantu
al Dio, nia forto; Ĝoje kriu al la Dio de Jakob. 2
Sonigu kanton, donu tamburinon, Ĉarman harpon,
kaj psalteron. 3 Muziku per korno en novmonato, Je
la plenluno, en la tago de nia festo. 4 Ĉar ĝi estas leĝo
por Izrael Kaj ordono de la Dio de Jakob. 5 Li aranĝis
ĝin kiel ateston por Jozef, Kiam Li eliris kontraŭ la
landon Egiptan. Lingvon, kiun mi ne konas, mi aŭdis:
6 Mi liberigis lian dorson de ŝarĝo, Liaj manoj liberiĝis
de korboj. 7 En la mizero vi vokis, kaj Mi vin helpis; Mi
respondis al vi en mistera loko de tondro; Mi esploris
vin ĉe la akvo de Malpaco. (Sela) 8 Aŭdu, ho Mia
popolo, Mi atestos al vi; Ho Izrael, se vi Min aŭskultus!
9 Ne estu ĉe vi alia dio; Kaj ne adoru fremdan dion. 10
Mi estas la Eternulo, via Dio, Kiu elkondukis vin el la
lando Egipta; Malfermu larĝe vian buŝon, kaj Mi ĝin
plenigos. 11 Sed Mia popolo ne aŭskultis Mian voĉon,
Izrael ne obeis Min. 12 Kaj Mi lasis ilin al la kaprico
de ilia koro, Ke ili iru laŭ siaj intencoj. 13 Ho, se Mia
popolo aŭskultus Min, Se Izrael irus per Miaj vojoj!
14 Rapide Mi faligus iliajn malamikojn, Kaj kontraŭ
iliajn premantojn Mi direktus Mian manon. 15 La
malamantoj de la Eternulo humiliĝus antaŭ Li, Kaj ilia
bonstato estus eterna. 16 Kaj Mi manĝigus al ili grason
de tritiko, Kaj Mi satigus vin per mielo el roko.

**82** Psalmo de Asaf. Dio stariĝis en Dia anaro; Inter
la dioj Li juĝas. 2 Ĝis kiam vi juĝos maljuste,
Kaj privilegios la personojn de malvirtuloj? (Sela)
3 Estu justaj al malriĉulo kaj orfo; Rilate afliktiton
kaj senhavulon estu virtaj. 4 Liberigu malriĉulon kaj
mizerulon; El la mano de malvirtulo ilin savu. 5 Ili
ne scias kaj ne komprenas, En mallumo ili marŝas;
Ekŝanceliĝis ĉiuj fundamentoj de la tero. 6 Mi diris:
Vi estas dioj, Kaj ĉiuj vi estas filoj de la Plejaltulo;
7 Sed vi mortos, kiel homoj, Kaj vi falos, kiel ĉiu el
la potenculoj. 8 Leviĝu, ho Dio, juĝu la teron; Ĉar Vi
heredas ĉiujn popolojn.

**83** Kanto-psalmo de Asaf. Ho Dio, ne silentu; Ne estu
senparola kaj ne restu trankvila, ho Dio! 2 Ĉar
jen Viaj malamikoj ekbruis, Kaj Viaj malamantoj levis
la kapon. 3 Kontraŭ Via popolo ili sekrete konspiras,
Kaj ili konsiliĝas kontraŭ Viaj gardatoj. 4 Ili diris:
Ni iru, kaj ni ekstermu ilin el inter la popoloj, Ke
oni ne plu rememoru la nomon de Izrael. 5 Ĉar ili
unuanime interkonsentis, Ili faris interligon kontraŭ
Vi: 6 La tendoj de Edom kaj la Iŝmaelidoj, Moab kaj la
Hagaridoj, 7 Gebal kaj Amon kaj Amalek, La Filiŝtoj
kun la loĝantoj de Tiro; 8 Ankaŭ Asirio aliĝis al ili Kaj
fariĝis helpo al la idoj de Lot. (Sela) 9 Faru al ili, kiel al
Midjan, Kiel al Sisera, kiel al Jabin ĉe la torento Kiŝon,
10 Kiuj estis ekstermitaj en En-Dor Kaj fariĝis sterko
por la tero. 11 Agu kun iliaj princoj kiel kun Oreb
kaj Zeeb, Kaj kun ĉiuj iliaj estroj kiel kun Zebaĥ kaj
Calmuna, 12 Kiuj diris: Ni ekposedu la loĝejon de Dio!
13 Ho mia Dio, similigu ilin al turniĝanta polvo, Al
pajlrestaĵo antaŭ vento. 14 Kiel fajro bruligas arbaron,
Kaj kiel flamo bruldezertigas montojn, 15 Tiel pelu ilin

per Via ventego, Kaj per Via fulmotondro ilin timigu.
16 Plenigu ilian vizaĝon per malhonoro, Por ke ili
turniĝu al Via nomo, ho Eternulo. 17 Ili estu hontigitaj
kaj timigitaj por ĉiam, Ili malhonoriĝu kaj pereu. 18
Kaj ili eksciu, ke Vi, kies nomo estas ETERNULO, Estas
sola Plejaltulo super la tuta tero.

**84** Al la Ĥorestro. Por la gitito. Psalmo de la
Koraĥidoj. Kiel ĉarmaj estas Viaj loĝejoj, ho
Eternulo Cebaot! 2 Mia animo deziras kaj sopiras al la
kortoj de la Eternulo; Mia koro kaj mia korpo sentas
ravon pri la viva Dio. 3 Eĉ birdo trovas domon kaj
hirundo neston por si, En kiu ĝi tenas siajn idojn:
Viajn altarojn, ho Eternulo Cebaot, mia Reĝo kaj mia
Dio. 4 Feliĉaj estas tiuj, kiuj loĝas en Via domo: Ili
laŭdas Vin konstante. (Sela) 5 Feliĉaj estas la homoj,
kies forto estas en Vi, Kaj en kies koro estas Viaj vojoj;
6 Kiuj pasas tra la Valo de Ploro kaj faras tie fontojn,
Kaj la printempa pluvo ĝin kovras per benoj; 7 Ili iras
de forto al forto, Aperas antaŭ Dio sur Cion. 8 Ho
Eternulo, Dio Cebaot, aŭdu mian preĝon; Aŭskultu,
ho Dio de Jakob! (Sela) 9 Nia ŝildo, vidu, ho Dio, Kaj
rigardu la vizaĝon de Via sanktoleito. 10 Ĉar tago en
Viaj kortoj estas pli bona, ol mil aliaj: Mi preferas
stari sur la sojlo de la domo de mia Dio, Ol loĝi en
tendoj de malvirto. 11 Ĉar Dio, la Eternulo, estas suno
kaj ŝildo; Favoron kaj honoron donas la Eternulo; Li
ne domaĝas bonon al tiuj, kiuj iras en virto. 12 Ho
Eternulo Cebaot, bone estas al la homo, kiu Vin fidas.

**85** Al la Ĥorestro. Psalmo de la Koraĥidoj. Vi
korfavoris, ho Eternulo, Vian landon, Vi revenigis
la forkaptitojn de Jakob; 2 Vi pardonis la kulpon de
Via popolo, Vi kovris ĉiujn ĝiajn pekojn. (Sela) 3 Vi
retenis Vian tutan koleron, Forlasis Vian furiozon.
4 Turnu Vin al ni, ho Dio de nia savo, Kaj ĉesigu
Vian koleron kontraŭ ni. 5 Ĉu eterne Vi nin koleros,
Daŭrigos Vian koleron de generacio al generacio? 6
Ĉu Vi ne revivigos nin denove, Ke Via popolo ĝoju per
Vi? 7 Aperigu al ni, ho Eternulo, Vian favoron, Kaj
Vian helpon donu al ni. 8 Mi aŭdu, kion diras Dio, la
Eternulo; Ĉar Li deklaros pacon al Sia popolo kaj al Siaj
fideluloj, Ke ili ne reiru al malsaĝeco. 9 Jam proksima
estas Lia helpo al tiuj, kiuj Lin timas, Por ke ekregu
honoro en nia lando. 10 Bono kaj vero renkontiĝas,
Justeco kaj paco sin kisas. 11 Vero elkreskas el la tero,
Kaj justeco rigardas el la ĉielo. 12 Kaj la Eternulo
donos bonon, Kaj nia tero donos siajn produktojn. 13
Justeco iros antaŭ Li Kaj faros vojon por Liaj paŝoj.

**86** Preĝo de David. Klinu, ho Eternulo, Vian orelon,
aŭskultu min; Ĉar mi estas mizera kaj malriĉa. 2
Konservu mian animon, ĉar mi estas fidela; Ho Vi, mia
Dio, helpu Vian sklavon, kiu fidas Vin. 3 Korfavoru
min, ho mia Sinjoro, Ĉar mi vokas al Vi la tutan tagon.
4 Ĝojigu la animon de Via sklavo, Ĉar al Vi, ho mia
Sinjoro, mi levas mian animon. 5 Ĉar Vi, mia Sinjoro,
estas bona kaj pardonema Kaj tre favora por ĉiuj, kiuj
Vin vokas. 6 Aŭskultu, ho Eternulo, mian preĝon,
Kaj atentu la voĉon de mia petego. 7 En tago de mia
sufero mi Vin vokas, Por ke Vi aŭskultu min. 8 Ne
ekzistas simila al Vi inter la dioj, ho mia Sinjoro, Kaj
ne ekzistas faroj kiel Viaj. 9 Ĉiuj popoloj, kiujn Vi
kreis, venos kaj kliniĝos antaŭ Via vizaĝo, ho mia
Sinjoro, Kaj honoros Vian nomon. 10 Ĉar Vi estas
granda kaj Vi faras miraklojn; Vi sola estas Dio. 11
Montru al mi, ho Eternulo, Vian vojon, por ke mi iru
en Via vero; Dediĉu mian koron al la respektado de
Via nomo. 12 Mi dankos Vin, ho mia Sinjoro, mia Dio,
per mia tuta koro, Kaj mi honoros Vian nomon eterne.
13 Ĉar granda estas Via boneco al mi; Kaj Vi savis mian
animon el la profundo de Ŝeol. **(Sheol h7585)** 14 Ho Dio,
fieruloj leviĝis kontraŭ mi, Kaj anaro da premantoj
serĉas mian animon Kaj ne havas Vin antaŭ si. 15 Sed
Vi, mia Sinjoro, estas Dio kompatema kaj favorkora,
Longetolerema kaj tre bona kaj verama. 16 Turnu
Vin al mi kaj korfavoru min, Donu Vian forton al Via
sklavo, Kaj helpu la filon de Via sklavino. 17 Faru
super mi signon por bono, Por ke miaj malamantoj
vidu kaj hontiĝu, Ĉar Vi, ho Eternulo, min helpos kaj
konsolos.

**87** De la Koraĥidoj. Psalmo-kanto. Lia fundamento
estas sur la sanktaj montoj. 2 La Eternulo amas
la pordegojn de Cion Pli ol ĉiujn loĝejojn de Jakob. 3
Gloraĵojn Li rakontas pri vi, ho urbo de Dio. (Sela) 4 Mi
parolas al miaj konatoj pri Egiptujo kaj Babel, Ankaŭ
pri Filiŝtujo kaj Tiro kun Etiopujo: Jen tiu tie naskiĝis.
5 Sed pri Cion oni diras: Tiu kaj tiu tie naskiĝis, Kaj
Li, la Plejaltulo, ĝin fortikigas. 6 La Eternulo notos,
enskribante la popolojn: Ĉi tiu tie naskiĝis. (Sela) 7
Kaj la kantistoj kaj muzikistoj: Ĉiuj miaj fontoj estas
en Vi.

88 Kanto-psalmo de la Koraĥidoj. Al la ĥorestro. Por
maĥalat-leanoto. Instruo de Heman, la Ezraĥido.
Ho Eternulo, Dio de mia savo! Tage kaj nokte mi krias
antaŭ Vi. 2 Mia preĝo venu antaŭ Vian vizaĝon; Klinu
Vian orelon al mia ploro. 3 Ĉar mia animo trosatiĝis
de malbonoj Kaj mia vivo atingis Ŝeolon. (Sheol h7585) 4
Mi similiĝis al la forirantoj en la tombon; Mi fariĝis
kiel viro sen fortoj, 5 Etendita inter mortintoj; Kiel
mortigitoj, kuŝantaj en la tombo, Kiujn Vi jam ne
rememoras Kaj kiuj estas forigitaj for de Via mano. 6
Vi metis min en la plej profundan foson, En mallumon,
en abismon. 7 Pezas sur mi Via furiozo, Kaj per ĉiuj
Viaj ondoj Vi min premas. (Sela) 8 Vi malproksimigis
de mi miajn konatojn, Vi faris min abomenaĵo por ili;
Mi estas enŝlosita, kaj mi ne povas eliri. 9 Mia okulo
mallumiĝis de malĝojo; Mi vokas Vin, ho Eternulo,
ĉiutage, Mi etendas al Vi miajn manojn. 10 Ĉu por
mortintoj Vi faros miraklojn? Ĉu malvivuloj leviĝos
kaj gloros Vin? (Sela) 11 Ĉu en la tombo estos rakontata
Via boneco, Kaj fidindeco en la abismo? 12 Ĉu en la
mallumo estos konataj Viaj mirakloj, Kaj Via justeco
en la lando de forgeso? 13 Sed mi vokas al Vi, ho
Eternulo, Kaj matene mia preĝo Vin renkontas. 14 Kial,
ho Eternulo, Vi forpuŝas mian animon? Kial Vi kaŝas
Vian vizaĝon de mi? 15 Mi estas mizera kaj senforta
detempe de la juneco; Mi portas Viajn terurojn, mi
konsumiĝas. 16 Venis sur min Via furiozo, Viaj timigoj
min dispremas. 17 Ili ĉirkaŭas min, kiel akvo, ĉiutage;
Ili tute min ĉirkaŭsieĝas. 18 Vi malproksimigis de mi
amanton kaj amikon; Miaj konatoj estas en mallumo.

89 Instruo de Etan, la Ezraĥido. La favorfarojn de
la Eternulo mi kantos eterne; De generacio al
generacio mi sciigos Vian fidelecon per mia buŝo. 2
Ĉar mi diris: Por eterne estas fundamentita la boneco,
En la ĉielo estas fortikigita Via fideleco. 3 Mi faris
interligon kun Mia elektito. Mi ĵuris al David, Mia
sklavo: 4 Por eterne Mi fortikigos vian semon, Kaj Mi
konstruis vian tronon por ĉiuj generacioj. (Sela) 5 Kaj
la ĉielo gloras Viajn miraklojn, ho Eternulo, Kaj Vian
fidelecon en la anaro de la sanktuloj. 6 Ĉar kiu en la
ĉielo estas egala al la Eternulo? Kiu estas simila al la
Eternulo inter la potenculoj? 7 Dio estas potenca en
la anaro de la sanktuloj, Kaj timinda por ĉiuj, kiuj Lin
ĉirkaŭas. 8 Ho Eternulo, Dio Cebaot, Kiu estas potenca
kiel Vi, ho Eternulo? Kaj Via fideleco estas en ĉio,
kio Vin ĉirkaŭas. 9 Vi regas la malkvietecon de la
maro; Kiam leviĝas ĝiaj ondoj, Vi ilin kvietigas. 10 Vi
faligis Rahabon, kiel mortigiton; Per Via forta brako
Vi diskurigis Viajn malamikojn. 11 Al Vi apartenas la
ĉielo, kaj ankaŭ al Vi apartenas la tero; La universon,
kaj ĉion, kio ĝin plenigas, Vi fondis. 12 La nordon
kaj la sudon Vi kreis; Tabor kaj Ĥermon prikantas
Vian nomon. 13 Vi havas brakon kun forto; Potenca
estas Via mano, alta estas Via dekstra. 14 Virto kaj
justeco estas la fundamento de Via trono; Boneco kaj
vero iras antaŭ Via vizaĝo. 15 Feliĉa estas la popolo,
kiu konas trumpetadon; Ho Eternulo, en la lumo de
Via vizaĝo ili marŝas; 16 Pro Via nomo ili ĝojas la
tutan tagon, Kaj ili fieras pro Via justeco. 17 Ĉar Vi
estas la beleco de ilia forto; Kaj pro Via favoro altiĝas
nia korno. 18 Ĉar de la Eternulo estas nia ŝildo, Kaj
de la Sanktulo de Izrael estas nia reĝo. 19 Tiam Vi
parolis en vizio al Viaj fideluloj, Kaj Vi diris: Mi sendis
helpon al heroo, Mi altigis elektiton el la popolo.
20 Mi trovis Davidon, Mian sklavon, Per Mia sankta
oleo Mi lin ŝmiris. 21 Mia mano lin subtenos, Kaj Mia
brako lin fortikigos. 22 Ne venkos lin malamiko, Kaj
malbonagulo lin ne premos. 23 Kaj Mi disbatos antaŭ
lia vizaĝo liajn malamikojn, Kaj liajn malamantojn
Mi frapos. 24 Kaj Mia fideleco kaj Mia favoro estas
kun li; Kaj per Mia nomo altiĝos lia korno. 25 Kaj
Mi etendos super la maron lian brakon Kaj super la
riverojn lian dekstran manon. 26 Li vokos Min: Vi
estas mia patro, Mia Dio, kaj la roko de mia savo. 27
Kaj Mi faros lin unuenaskito, Ĉefo super la reĝoj de la
tero. 28 Por ĉiam Mi konservos al li Mian favoron; Kaj
Mia interligo kun li estos fidela. 29 Kaj lian semon
Mi faros eterna, Kaj lian tronon longedaŭra kiel la
ĉielo. 30 Se liaj filoj forlasos Mian instruon Kaj ne iros
laŭ Miaj leĝoj; 31 Se Miajn decidojn ili malplenumos
Kaj Miajn ordonojn ili ne observos: 32 Tiam Mi per
bastono punos ilian pekon Kaj per batoj ilian krimon;
33 Sed Mian favoron Mi ne forprenos de li, Kaj Mian
fidelecon Mi ne perfidos; 34 Mi ne malplenumos Mian
interligon, Kaj tion, kio eliris el Mia buŝo, Mi ne
ŝanĝos. 35 Unu aferon Mi ĵuris per Mia sankteco: Mi
ne perfidos al David; 36 Lia semo estos eterna, Kaj lia
trono estos kiel la suno antaŭ Mi. 37 Kiel la luno, ĝi
staros eterne, Kaj kiel la atestulo en la ĉielo ĝi estos
fidinda. (Sela) 38 Sed nun Vi forpuŝis kaj malestimis,
Vi koleris Vian sanktoleiton. 39 Vi disigis la interligon
kun Via sklavo, Ĵetis sur la teron lian kronon. 40 Vi
detruis ĉiujn liajn barilojn, Ruinigis liajn fortikaĵojn.

41 Prirabas lin ĉiuj pasantoj; Li fariĝis mokataĵo por
siaj najbaroj. 42 Vi altigis la dekstran manon de liaj
malamikoj, Vi ĝojigis ĉiujn liajn kontraŭulojn. 43 Vi
returnis la tranĉon de lia glavo, Kaj ne subtenis lin en
la milito. 44 Vi forigis lian brilon, Kaj lian tronon Vi
ĵetis sur la teron. 45 Vi mallongigis la tagojn de lia
juneco, Vi kovris lin per honto. (Sela) 46 Ĝis kiam,
ho Eternulo, Vi kaŝos Vin senĉese Kaj Via kolerego
brulos kiel fajro? 47 Ho, rememoru, kia estas la daŭro
de mia vivo, Por kia vantaĵo Vi kreis ĉiujn homidojn.
48 Kiu homo vivas kaj neniam vidos morton, Savos
sian animon de la mano de Ŝeol? (Sela) **(Sheol h7585)**
49 Kie estas Viaj antaŭaj favorfaroj, mia Sinjoro, Pri
kiuj Vi ĵuris al David per Via fideleco? 50 Rememoru,
mia Sinjoro, la malhonoron de Viaj sklavoj, Kiun mi
portas en mia brusto de ĉiuj multaj popoloj, 51 Kaj
per kiu malhonoras Viaj malamikoj, ho Eternulo, Per
kiu ili malhonoras la paŝosignojn de Via sanktoleito.
52 Glorata estu la Eternulo eterne. Amen, kaj Amen!

**90** Preĝo de Moseo, homo de Dio. Mia Sinjoro, Vi
estis por ni loĝejo De generacio al generacio. 2
Antaŭ ol la montoj naskiĝis Kaj Vi kreis la teron kaj
la mondon, Kaj de eterne ĝis eterne, Vi estas Dio.
3 Vi venigas homon al polvo; Kaj Vi diras: Revenu,
homidoj. 4 Ĉar mil jaroj estas en Viaj okuloj Kiel la
hieraŭa tago, kiu pasis, Kaj kiel nokta gardoparto. 5 Vi
forfluigas ilin torente, ili estas kiel sonĝo; Matene ili
renoviĝas kiel herbo: 6 Matene ĝi floras kaj ĝermas,
Vespere ĝi dehakiĝas kaj sekiĝas. 7 Jes, ni pereas de
Via kolero, Kaj de Via kolerego ni neniiĝas. 8 Vi metis
niajn malbonagojn antaŭ Vin, Nian kaŝitaĵon antaŭ la
lumon de Via vizaĝo. 9 Ĉar ĉiuj niaj tagoj pasis sub
Via kolero, Malaperis niaj jaroj, kiel sono. 10 La daŭro
de nia vivo estas sepdek jaroj, Kaj ĉe forteco okdek
jaroj; Kaj ilia tuta majesto estas penado kaj suferado,
Ĉar ĝi forkuras rapide kaj ni forflugas. 11 Kiu scias
la forton de Via kolero, Vian timindecon kaj Vian
indignon? 12 Instruu nin kalkuli niajn tagojn, Por ke
ni akiru saĝan koron. 13 Returnu Vin, ho Eternulo!
Kiel longe? Kaj kompatu Viajn sklavojn. 14 Satigu nin
matene per Via boneco; Kaj ni kantos kaj ĝojos en la
daŭro de nia tuta vivo. 15 Ĝojigu nin tiel longe, kiel Vi
nin premis, Tiom da jaroj, kiom ni vidis mizeron. 16
Al Viaj sklavoj aperu Viaj faroj, Kaj Via beleco al iliaj
infanoj. 17 Kaj la favoro de la Eternulo, nia Dio, estu
super ni; Kaj la faron de niaj manoj fortikigu al ni, Kaj
fortikigu la faron de niaj manoj.

**91** Kiu loĝas sub la ŝirmo de la Plejaltulo, Tiu ripozas
en la ombro de la Plejpotenculo. 2 Mi diras al la
Eternulo: Mia rifuĝejo kaj mia fortikaĵo Estas Dio, kiun
mi fidas. 3 Ĉar Li savos vin de la reto de kaptisto, De
la pereiga pesto. 4 Per Siaj plumoj Li ŝirmos vin, Kaj
sub Liaj flugiloj vi rifuĝos; Lia fideleco estas ŝildo kaj
kiraso. 5 Ne timu la teruron de nokto, Nek sagon, kiu
flugas tage, 6 Nek peston, kiu iras en mallumo, Nek
epidemion, kiu ekstermas tagmeze. 7 Ĉe via flanko
falos milo, Kaj dek miloj ĉe via dekstra flanko; Sed
vin ĝi ne tuŝos. 8 Vi nur rigardos per viaj okuloj, Kaj
vi vidos la redonon al la malvirtuloj. 9 Ĉar Vi, ho
Eternulo, estas mia defendo! La Plejaltulon vi elektis
kiel vian rifuĝejon. 10 Ne trafos vin malbono, Kaj
frapo ne atingos vian tendon. 11 Ĉar al Siaj anĝeloj
Li ordonis pri vi, Ke ili vin gardu sur ĉiuj viaj vojoj.
12 Sur la manoj ili vin portos, Por ke vi ne falpuŝiĝu
sur ŝtono per via piedo. 13 Sur leonon kaj aspidon vi
paŝos, Vi piedpremos leonidon kaj drakon. 14 Ĉar li
ekamis Min, tial Mi lin savos; Mi defendos lin, ĉar
li konas Mian nomon. 15 Li vokos Min, kaj Mi lin
aŭskultos; Mi estos kun li en mizero; Mi lin liberigos
kaj honoratigos. 16 Mi satigos lin per longa vivo, Kaj
aperigos al li Mian helpon.

**92** Psalmo-kanto por la tago sabata. Bone estas
glori la Eternulon Kaj prikanti Vian nomon, ho
Plejaltulo; 2 Rakonti matene pri Via boneco Kaj nokte
pri Via fideleco, 3 Sur dekkorda instrumento kaj sur
psaltero, Per solenaj sonoj de harpo. 4 Ĉar Vi ĝojigis
min, ho Eternulo, per Viaj agoj; La farojn de Viaj
manoj mi prikantos. 5 Kiel grandaj estas Viaj faroj, ho
Eternulo! Tre profundaj estas Viaj pensoj. 6 Malklerulo
ne scias, Kaj malsaĝulo tion ne komprenas. 7 Kiam
malvirtuloj verdestas kiel herbo Kaj ĉiuj malbonaguloj
floras, Tio kondukas al ilia ekstermiĝo por eterne. 8
Kaj Vi estas alta eterne, ho Eternulo. 9 Ĉar jen Viaj
malamikoj, ho Eternulo, Jen Viaj malamikoj pereas,
Diskuras ĉiuj malbonaguloj. 10 Sed mian kornon Vi
altigas kiel la kornon de bubalo; Mi estas oleita per
freŝa oleo. 11 Kaj mia okulo rigardas miajn malamikojn;
Pri la malbonaguloj, miaj kontraŭuloj, aŭdas miaj
oreloj. 12 Virtulo verdestas, kiel palmo, Staras alte,
kiel cedro sur Lebanon. 13 Plantitaj en la domo de la
Eternulo, Ili verdestas en la kortoj de nia Dio. 14 Ili

floras ankoraŭ en la maljuneco, Estas sukplenaj kaj
freŝaj, 15 Por sciigi, ke la Eternulo estas justa, Mia
fortikaĵo, kaj ne ekzistas en Li maljusteco.

93 La Eternulo reĝas; Li estas vestita de majesto; La
Eternulo estas vestita kaj zonita de potenco; Kaj
fortikigita estas la mondo, ke ĝi ne ŝanceliĝu. 2 De
antikve estas fortika Via trono; Vi estas de eterne.
3 Levas la riveroj, ho Eternulo, levas la riveroj sian
voĉon, Levas la riveroj sian bruon; 4 Pli ol la bruo de
multego da akvo, Ol la potencaj ondoj de la maro,
Potenca estas la Eternulo en la altaĵo. 5 Viaj leĝoj estas
tre fidindaj; Via domo estas ornamita de sankteco, Ho
Eternulo, por eterne.

94 Dio de venĝo, ho Eternulo, Dio de venĝo, aperu! 2
Leviĝu, Juĝanto de la tero; Redonu la meritaĵon al
la fieruloj. 3 Kiel longe la malvirtuloj, ho Eternulo, Kiel
longe la malvirtuloj triumfos? 4 Ili estas malhumilaj,
parolas arogantaĵon; Fanfaronas ĉiuj malbonaguloj.
5 Vian popolon, ho Eternulo, ili premas, Kaj Vian
heredon ili turmentas. 6 Vidvinon kaj fremdulon
ili mortigas, Kaj orfojn ili buĉas. 7 Kaj ili diras:
La Eternulo ne vidas, Kaj la Dio de Jakob ne scias.
8 Komprenu, senprudentuloj en la popolo; Kaj vi,
malsaĝuloj, kiam vi saĝiĝos? 9 Ĉu ne aŭdas Tiu, kiu
aranĝis orelon? Ĉu ne vidas Tiu, kiu kreis okulon? 10
Ĉu ne punas la ĝustiganto de la popoloj, Kiu instruas al
homo scion? 11 La Eternulo scias la pensojn de homo,
Ke ili estas vantaj. 12 Bone estas al la homo, kiun Vi, ho
Eternulo, ĝustigas, Kaj al kiu Vi instruas Vian leĝon,
13 Por trankviligi lin en la malbonaj tagoj, Ĝis estos
pretigita la foso por la malvirtulo. 14 Ĉar la Eternulo
ne forpuŝos Sian popolon, Kaj Sian heredon Li ne
forlasos. 15 Ĉar juĝo revenos al vero, Kaj ĝin sekvos ĉiuj
virtkoruloj. 16 Kiu helpas min kontraŭ malbonuloj?
Kiu staras apud mi kontraŭ malbonaguloj? 17 Se la
Eternulo ne estus mia helpanto, Mia animo preskaŭ
kuŝus jam silenta. 18 Kiam mi diris, ke mia piedo
ŝanceliĝas, Via boneco, ho Eternulo, min subtenis. 19
Kiam mi havas interne multe da maltrankvilaj pensoj,
Viaj konsoloj karesas mian animon. 20 Ĉu aliĝos al Vi
trono de maljusteco, Kiu aranĝas maljustaĵon en la
nomo de la leĝo? 21 Ili sin armas kontraŭ la animo
de virtulo, Kaj sangon senkulpan ili akuzas. 22 Sed
la Eternulo estos mia rifuĝejo; Kaj mia Dio estos la
roko de mia ŝirmo. 23 Kaj Li redonos al ili por iliaj
malbonagoj, Kaj por ilia malboneco Li ilin ekstermos;
Ilin ekstermos la Eternulo, nia Dio.

95 Venu, ni kantu al la Eternulo; Ni ĝoje kriu al
la rifuĝejo de nia helpo. 2 Ni venu antaŭ Lian
vizaĝon kun glorado, Per psalmoj ni ĝoje kriu al Li. 3
Ĉar granda Dio estas la Eternulo Kaj granda Reĝo super
ĉiuj dioj, 4 Kiu havas en Sia mano la profundaĵojn de
la tero, Kaj al kiu apartenas la altaĵoj de la montoj; 5 Al
kiu apartenas la maro, kaj Li ĝin faris, Kaj la sekteron
Liaj manoj kreis. 6 Venu, ni kliniĝu, ni ĵetu nin teren,
Ni genuu antaŭ la Eternulo, nia Kreinto. 7 Ĉar Li estas
nia Dio, Kaj ni estas la popolo de Lia paŝtejo kaj la
ŝafoj de Lia mano. Hodiaŭ, se vi aŭskultas Lian voĉon,
8 Ne obstinigu vian koron, kiel en Meriba, Kiel en la
tago de Masa en la dezerto, 9 Kiam viaj patroj Min
incitis, Esploris kaj vidis Mian faron. 10 Kvardek jarojn
Mi indignis kontraŭ tiu generacio, Kaj Mi diris: Ili
estas popolo kun koro malĝusta, Kaj ili ne volas koni
Miajn vojojn; 11 Tial Mi ĵuris en Mia kolero, Ke ili ne
venos en Mian ripozejon.

96 Kantu al la Eternulo novan kanton; Kantu al la
Eternulo la tuta tero. 2 Kantu al la Eternulo,
gloru Lian nomon, Proklamu de tago al tago Lian
savon. 3 Rakontu inter la popoloj Lian gloron, Inter
ĉiuj gentoj Liajn miraklojn. 4 Ĉar la Eternulo estas
granda kaj tre glorinda, Li estas timinda pli ol ĉiuj
dioj. 5 Ĉar ĉiuj dioj de la popoloj estas nur idoloj; Sed
la Eternulo kreis la ĉielon. 6 Gloro kaj majesto estas
antaŭ Li, Forto kaj beleco estas en Lia sanktejo. 7
Tributu al la Eternulo, familioj de la popoloj; Tributu
al la Eternulo gloron kaj potencon. 8 Tributu al la
Eternulo la honoron de Lia nomo; Alportu donacon
kaj venu en Liajn kortojn. 9 Kliniĝu al la Eternulo
en sankta ornamo; Tremu antaŭ Li la tuta tero. 10
Diru inter la popoloj: La Eternulo reĝas, Kaj fortikigita
estas la mondo, ke ĝi ne ŝanceliĝu; Li juĝas la popolojn
en justeco. 11 Ĝoju la ĉielo, kaj estu gaja la tero, Bruu
la maro, kaj ĉio, kio ĝin plenigas. 12 Ĝoju la kampo,
kaj ĉio, kio estas sur ĝi; Tiam kantu ĉiuj arboj de la
arbaro 13 Antaŭ la Eternulo, ĉar Li venas, Ĉar Li venas,
por juĝi la teron; Li juĝos la mondon kun justeco Kaj
la popolojn kun Sia fideleco.

97 La Eternulo reĝas; ĝoju la tero; Estu gajaj la
multaj insuloj. 2 Nubo kaj mallumo estas ĉirkaŭ
Li; Vero kaj justeco estas la fundamento de Lia

trono. 3 Fajro iras antaŭ Li, Kaj bruligas ĉirkaŭe Liajn
malamikojn. 4 Liaj fulmoj lumigas la mondon; La
tero vidas, kaj tremas. 5 Montoj fandiĝas kiel vakso
antaŭ la vizaĝo de la Eternulo, Antaŭ la vizaĝo de
la Sinjoro de la tuta tero. 6 La ĉielo rakontas Lian
veron, Kaj ĉiuj popoloj vidas Lian gloron. 7 Hontiĝu
ĉiuj, kiuj servas al idoloj, Kiuj laŭdas sin pro diaĉoj.
Kliniĝu antaŭ Li ĉiuj dioj. 8 Aŭdis kaj ekĝojis Cion,
Kaj ektriumfis la filinoj de Jehuda Pro Viaj juĝoj, ho
Eternulo. 9 Ĉar Vi, ho Eternulo, estas Plejalta super
la tuta tero, Vi tre alte leviĝis super ĉiuj dioj. 10
Amantoj de la Eternulo, malamu malbonon. Li gardas
la animojn de Siaj fideluloj; Li savos ilin de la mano de
malvirtuloj. 11 Lumo verŝiĝas sur virtulon, Kaj ĝojo
sur purkorulojn. 12 Ĝoju, virtuloj, pro la Eternulo, Kaj
gloru Lian sanktan nomon.

**98** Psalmo. Kantu al la Eternulo novan kanton, Ĉar
miraklojn Li faris; Helpis Lin Lia dekstra mano
kaj Lia sankta brako. 2 La Eternulo aperigis Sian savon;
Antaŭ la okuloj de la popoloj Li malkaŝis Sian justecon.
3 Li memoras Sian bonecon kaj Sian fidelecon al la
domo de Izrael. Vidis ĉiuj finoj de la tero la helpon de
nia Dio. 4 Ĝoje kriu al la Eternulo la tuta tero; Kantu,
gloru, kaj muziku. 5 Muziku al la Eternulo per harpo,
Per harpo kaj per sonoj de psalmo. 6 Per trumpetoj
kaj per sono de korno Ĝoje kriu antaŭ la Reĝo, la
Eternulo. 7 Bruu la maro, kaj ĉio, kio ĝin plenigas,
La mondo kaj ĝiaj loĝantoj. 8 La riveroj plaŭdu per
la manoj, La montoj kune kantu ĝoje, 9 Antaŭ la
Eternulo, ĉar Li venas, por juĝi la teron; Li juĝos la
mondon kun justeco kaj la popolojn kun vereco.

**99** La Eternulo reĝas, tremas la popoloj; Li sidas sur
keruboj, ŝanceliĝas la tero. 2 La Eternulo estas
granda en Cion, Kaj Li estas alte super ĉiuj popoloj.
3 Oni gloru Vian grandan kaj timindan nomon: Li
estas sankta. 4 Kaj la forton de la reĝo, kiu amas
justecon, Vi fortikigis en praveco; Juĝon kaj justecon
en Jakob Vi aranĝis. 5 Altigu la Eternulon, nian Dion,
Kaj kliniĝu antaŭ la benketo de Liaj piedoj: Li estas
sankta. 6 Moseo kaj Aaron estas inter Liaj pastroj,
Kaj Samuel estas inter tiuj, kiuj vokas Lian nomon; Ili
vokis al la Eternulo, kaj Li ilin aŭskultis. 7 El nuba
kolono Li parolis al ili; Ili observis Liajn regulojn, kaj
la leĝon, kiun Li donis al ili. 8 Ho Eternulo, nia Dio, Vi
ilin aŭskultis; Vi estis por ili Dio pardonanta, kvankam
venĝanto por iliaj faroj. 9 Altigu la Eternulon, nian
Dion, Kaj kliniĝu antaŭ Lia sankta monto; Ĉar sankta
estas la Eternulo, nia Dio.

**100** Psalmo de dankado. Ĝoje kriu al la Eternulo
la tuta tero! 2 Servu al la Eternulo kun ĝojo,
Venu antaŭ Lian vizaĝon kun kanto. 3 Sciu, ke la
Eternulo estas Dio; Li nin kreis, kaj al Li ni apartenas,
Lia popolo kaj ŝafoj de Lia paŝtejo. 4 Eniru en Liajn
pordegojn kun dankado, En Liajn kortojn kun laŭdado.
Gloru Lin, benu Lian nomon; 5 Ĉar la Eternulo estas
bona; Lia favorkoreco estas eterna, Kaj de generacio
al generacio daŭras Lia fideleco.

**101** Psalmo de David. Bonecon kaj justecon mi
prikantos; Al Vi, ho Eternulo, mi muzikos. 2 Mi
penas iri prudente la vojon de pieco; Kiam Vi venos al
mi? Mi iras kun pura koro interne de mia domo. 3 Mi
ne metas antaŭ miajn okulojn malbonan aferon; Mi
malamas farojn de malfideleco, Ili ne aliĝas al mi. 4
Koro perversa foriĝu de mi; Malbonon mi ne volas
koni. 5 Kiu sekrete kalumnias sian proksimulon, tiun
mi ekstermos; Kiu havas fieran okulon kaj malhumilan
koron, tiun mi ne toleros. 6 Miaj okuloj restas turnataj
al la fideluloj de la tero, ke ili sidu kun mi; Kiu
iras la vojon de pieco, tiu servu al mi. 7 Ne loĝos
interne de mia domo iu, kiu agas hipokrite; Kiu diras
malveron, tiu ne staros antaŭ miaj okuloj. 8 Fervore
mi ekstermos ĉiujn malvirtulojn de la lando, Por
elradikigi el la urbo de la Eternulo ĉiujn krimulojn.

**102** Preĝo de mizerulo, kiam li perdas la fortojn
kaj elverŝas antaŭ la Eternulo sian malĝojon.
Ho Eternulo, aŭskultu mian preĝon; Kaj mia krio
venu al Vi. 2 Ne kaŝu antaŭ mi Vian vizaĝon en la
tago de mia suferado; Klinu al mi Vian orelon; En
la tago, kiam mi vokas, rapide aŭskultu min. 3 Ĉar
pasis kiel fumo miaj tagoj, Kaj miaj ostoj ĉirkaŭbrulis
kiel en forno. 4 Falĉiĝis kiel herbo kaj sekiĝis mia
koro, Ĉar mi forgesis manĝi mian panon. 5 De la voĉo
de mia plorado Algluiĝis miaj ostoj al mia karno. 6
Mi similiĝis al pelikano en la dezerto, Mi fariĝis kiel
noktuo en ruinoj. 7 Mi ne dormas, Kaj mi estas kiel
birdo solulo sur tegmento. 8 Ĉiutage insultas min
miaj malamikoj, Miaj mokantoj ĵuras per mi. 9 Ĉar
cindron mi manĝis kiel panon, Kaj mian trinkaĵon mi
miksis kun larmoj, 10 Kaŭze de Via kolero kaj indigno;
Ĉar Vi min levis kaj ĵetis. 11 Miaj tagoj malaperas
kiel ombro, Kaj mi sekiĝas kiel herbo. 12 Sed Vi,
ho Eternulo, restas eterne; Kaj la memoro pri Vi

restas de generacio al generacio. 13 Vi leviĝos, Vi
korfavoros Cionon; Ĉar estas tempo por ĝin kompati,
ĉar venis la tempo. 14 Ĉar Viaj sklavoj ekamis ĝiajn
ŝtonojn, Ĉarma estas por ili ĝia polvo. 15 Kaj ektimos
popoloj la nomon de la Eternulo, Kaj ĉiuj reĝoj de
la tero Vian gloron. 16 Ĉar la Eternulo rekonstruis
Cionon, Kaj aperis en Sia gloro. 17 Li Sin turnis al la
preĝo de la forlasitoj, Kaj ne forpuŝis ilian petegon.
18 Ĉi tio estos skribita por estontaj generacioj; Kaj
rekreita popolo gloros la Eternulon. 19 Ĉar Li rigardis
malsupren el Sia sankta altaĵo, El la ĉielo la Eternulo
direktis rigardon al la tero, 20 Por aŭdi la ĝemon de
malliberulo, Por liberigi la kondamnitajn al morto; 21
Por ke oni rakontu en Cion pri la nomo de la Eternulo
Kaj en Jerusalem pri Lia gloro, 22 Kiam kolektiĝos
kune la popoloj kaj regnoj, Por servi al la Eternulo.
23 Li lacigis en la vojo miajn fortojn, Li mallongigis
miajn tagojn. 24 Mi diras: Ho mia Dio, ne forprenu
min en la mezo de miaj tagoj, Vi, kies jaroj estas de
generacio al generacio. 25 En antikveco Vi fondis la
teron; Kaj la ĉielo estas la faro de Viaj manoj. 26 Ili
pereos, sed Vi restos; Kaj ĉiuj ili eluziĝos kiel vesto,
Kiel veston Vi ilin ŝanĝos, kaj ili ŝanĝiĝos. 27 Sed Vi
restas la sama, Kaj Viaj jaroj ne finiĝos. 28 La filoj de
Viaj sklavoj restos, Kaj ilia semo fortikiĝos antaŭ Vi.

**103** De David. Benu, ho mia animo, la Eternulon,
Kaj mia tuta internaĵo Lian sanktan nomon.
2 Benu, ho mia animo, la Eternulon, Kaj ne forgesu
ĉiujn Liajn bonfarojn. 3 Li pardonas ĉiujn viajn pekojn,
Li sanigas ĉiujn viajn malsanojn; 4 Li savas de la
tombo vian vivon, Li kronas vin per boneco kaj
favorkoreco; 5 Li satigas per bonaĵoj vian maljunan
aĝon, Ke via juneco renoviĝas kiel ĉe aglo. 6 La
Eternulo faras justecon kaj juĝon al ĉiuj prematoj.
7 Li sciigis Siajn vojojn al Moseo, Siajn farojn al
la Izraelidoj. 8 Favorkora kaj kompatema estas la
Eternulo, Longetolerema kaj tre bona. 9 Ne eterne Li
indignas, Kaj ne por ĉiam Li koleras. 10 Ne laŭ niaj
pekoj Li agis kun ni, Kaj ne laŭ niaj krimoj Li redonis
al ni. 11 Ĉar kiel alte estas la ĉielo super la tero, Tiel
granda estas Lia boneco por tiuj, kiuj Lin timas. 12
Kiel malproksime estas la oriento de la okcidento,
Tiel Li malproksimigis de ni niajn pekojn. 13 Kiel
patro korfavoras filojn, Tiel la Eternulo korfavoras
tiujn, kiuj Lin timas. 14 Ĉar Li scias nian esencon; Li
memoras, ke ni estas polvo. 15 La tagoj de homo estas
kiel herbo; Kiel floro de kampo, tiel li floras. 16 Pasas
super ĝi vento, kaj ĝi jam ne ekzistas; Kaj ĝia loko ĝin
jam ne rekonas. 17 Sed la boneco de la Eternulo daŭras
eterne al tiuj, kiuj Lin timas, Kaj Lia bonfaremeco
iras ĝis la pranepoj, 18 Kiuj observas Lian interligon
Kaj memoras Liajn ordonojn por ilin plenumi. 19
La Eternulo starigis en la ĉielo Sian tronon; Kaj Lia
reĝeco regas ĉion. 20 Benu la Eternulon Liaj anĝeloj,
potencaj per sia forto, Kiuj plenumas Lian vorton,
Por ke oni obeu la voĉon de Lia vorto. 21 Benu la
Eternulon ĉiuj Liaj ĉirkaŭantoj, Liaj servantoj, kiuj
plenumas Lian volon. 22 Benu la Eternulon ĉiuj Liaj
kreitaĵoj, En ĉiuj lokoj de Lia regado. Benu, ho mia
animo, la Eternulon.

**104** Benu, ho mia animo, la Eternulon. Ho Eternulo,
mia Dio, Vi estas tre granda, De majesto kaj
beleco Vi estas vestita; 2 Vi, kiu estas ĉirkaŭkovrita de
lumo kiel de vesto, Kiu sternas la ĉielon kiel tapiŝon;
3 Kiu aranĝas sur la akvo Siajn ĉambrojn, Kiu faras
la nubojn Lia veturilo; Kiu iras sur la flugiloj de la
vento; 4 Kiu faras la ventojn Liaj senditoj, Flamantan
fajron Liaj servantoj; 5 Kiu fondis la teron sur ĝiaj
fundamentoj, Ke ĝi neniam ŝanceliĝos. 6 La abismon
Vi kovris kiel per vesto, Sur la montoj staras akvo; 7
De Via minaco ĝi kuras, De la voĉo de Via tondro ĝi
forrapidas. 8 Ĝi leviĝas sur montojn, malleviĝas sur
valojn, Al tiu loko, kiun Vi destinis por ĝi. 9 Vi faris
limon, kiun ĝi ne superpaŝos, Por ke ĝi ne revenu
por kovri la teron. 10 Vi sendas fontojn al la riveroj,
Kiuj iras inter montoj; 11 Ili trinkigas ĉiujn kampajn
bestojn; Sovaĝaj azenoj kvietigas sian soifon. 12 Apud
ili loĝas la birdoj ĉielaj, El inter la branĉoj ili sonigas
sian voĉon. 13 Vi trinkigas la montojn el Viaj ĉambroj;
Per la produktoj de Viaj faroj satiĝas la tero. 14 Vi
kreskigas herbon por la bruto, Kaj verdaĵon, kiu servas
al la homo, Por elirigi panon el la tero. 15 Kaj la vino
gajigas la koron de la homo, La vizaĝo brilas de la
oleo, Kaj la pano fortikigas la koron de la homo. 16
Satiĝas la arboj de la Eternulo, La cedroj de Lebanon,
kiujn Li plantis; 17 Kaj tie nestas birdoj; Cikonio havas
sian loĝejon sur abioj; 18 La altaj montoj estas por
la ibeksoj, La rokoj estas rifuĝejo por la hirakoj. 19
Li aranĝis la lunon laŭ la partoj de tempo; La suno
scias sian subiron. 20 Vi sendas mallumon, kaj fariĝas
nokto, Dum kiu vagas ĉiuj arbaraj bestoj; 21 La leonidoj
krias pri rabakiro, Por peti de Dio sian manĝaĵon.

22 Kiam leviĝas la suno, Ili sin kaŝas kaj kuŝiĝas en
siaj loĝejoj. 23 Eliras homo por sia okupiĝo, Por sia
laboro ĝis la vespero. 24 Kiel multaj estas Viaj faroj, ho
Eternulo! Ĉion Vi faris kun saĝo; La tero estas plena
de Viaj faritaĵoj. 25 Jen la maro, granda kaj vasta: Tie
estas rampaĵoj sennombraj, Bestoj malgrandaj kaj
grandaj; 26 Tie iras ŝipoj; Tie estas la levjatano, kiun
Vi kreis, ke ĝi tie ludu. 27 Ĉiuj ili atendas de Vi, Ke Vi
donu al ili manĝon en ĝia tempo. 28 Vi donas al ili, ili
kolektas; Vi malfermas Vian manon, kaj ili satiĝas de
bonaĵo. 29 Vi kaŝas Vian vizaĝon, tiam ili ektimas; Vi
forprenas ilian spiriton, Tiam ili mortas kaj revenas al
sia polvo. 30 Vi sendas Vian spiriton, tiam ili kreiĝas;
Kaj Vi renovigas la vizaĝon de la tero. 31 Gloro al
la Eternulo estu eterne; La Eternulo ĝoju pri Siaj
faritaĵoj. 32 Li ekrigardas la teron, kaj ĝi tremas; Li
ektuŝas la montojn, kaj ili fumiĝas. 33 Mi kantados al
la Eternulo, dum mi vivos; Mi muzikados al mia Dio,
dum mi estos. 34 Agrabla estu al Li mia meditado;
Mi ĝojos pri la Eternulo. 35 Malaperu pekuloj de sur
la tero, Kaj malvirtuloj ne plu ekzistu. Benu, ho mia
animo, la Eternulon. Haleluja!

**105** Gloru la Eternulon, voku Lian nomon; Sciigu
inter la popoloj Liajn farojn. 2 Kantu al Li,
muziku al Li; Parolu pri ĉiuj Liaj mirakloj. 3 Laŭdu
Lian sanktan nomon; Ĝoju la koro de tiuj, kiuj serĉas
la Eternulon. 4 Turnu vin al la Eternulo kaj al Lia
potenco; Serĉu ĉiam Lian vizaĝon. 5 Memoru Liajn
miraklojn, kiujn Li faris, Liajn signomiraklojn kaj la
juĝojn de Lia buŝo; 6 Vi, semo de Abraham, Lia sklavo,
Filoj de Jakob, Liaj elektitoj. 7 Li estas la Eternulo, nia
Dio; Sur la tuta tero estas Liaj juĝoj. 8 Li memoras
eterne Sian interligon, La vorton, kiun Li testamentis
por mil generacioj, 9 Kiun Li interkonsentis kun
Abraham Kaj ĵuris al Isaak. 10 Li metis ĝin por Jakob
kiel leĝon, Por Izrael kiel eternan interligon, 11
Dirante: Al vi Mi donos la landon Kanaanan Kiel vian
parton heredan. 12 Kiam ili estis malgrandnombraj,
Malmultaj, kaj fremduloj en ĝi, 13 Kaj ili iradis de
popolo al popolo, El unu regno al alia gento, 14 Tiam
Li al neniu permesis premi ilin, Kaj Li punis pro ili
reĝojn, dirante: 15 Ne tuŝu Miajn sanktoleitojn, Kaj
al Miaj profetoj ne faru malbonon. 16 Kaj Li sendis
malsaton en la landon, Rompis ĉion, kio portis panon.
17 Li sendis antaŭ ili homon: Jozef estis vendita kiel
sklavo. 18 Oni enpremis liajn piedojn en katenojn,
Fero ŝarĝis lian korpon, 19 Ĝis la tempo, kiam venis
Lia vorto; La parolo de la Eternulo lin elprovis. 20
Reĝo sendis kaj malligis lin, Reganto super popoloj
liberigis lin; 21 Li faris lin sinjoro super lia domo
Kaj reganto super lia tuta havo, 22 Ke li submetu al
si liajn eminentulojn Kaj saĝigu liajn maljunulojn.
23 Kaj Izrael venis en Egiptujon, Kaj Jakob enmigris
en la landon de Ĥam. 24 Kaj Li tre kreskigis Sian
popolon, Kaj faris ĝin pli forta ol ĝiaj malamikoj.
25 Li malĝustigis ilian koron, Ke ili ekmalamis Lian
popolon, ekruzis kontraŭ Liaj sklavoj. 26 Li sendis
Moseon, Sian sklavon, Kaj Aaronon, kiun Li elektis. 27
Ili faris inter ili Liajn pruvosignojn Kaj miraklojn en la
lando de Ĥam. 28 Li sendis mallumon kaj mallumigis;
Kaj ili ne atentis Liajn vortojn. 29 Li ŝanĝis ilian akvon
en sangon, Kaj senvivigis iliajn fiŝojn. 30 Ilia tero
eksvarmigis ranojn, En la ĉambroj de iliaj reĝoj. 31 Li
diris, kaj venis fiinsektoj, Pedikoj en ĉiuj iliaj regionoj.
32 Antataŭ pluvo Li donis al ili hajlon, Flamantan
fajron en ilia lando. 33 Li batis iliajn vinbertrunkojn
kaj iliajn figarbojn, Kaj rompis la arbojn en iliaj limoj.
34 Li diris, kaj venis akridoj kaj skaraboj sennombraj
35 Kaj formanĝis la tutan herbon en ilia lando Kaj
formanĝis la produktojn de ilia tero. 36 Kaj Li mortigis
ĉiujn unuenaskitojn en ilia lando, La komencaĵojn de
ĉiuj iliaj fortoj. 37 Sed ilin Li elkondukis kun arĝento
kaj oro, Kaj en iliaj triboj estis neniu kadukulo. 38
Ĝojis Egiptujo, kiam ili eliris, Ĉar atakis ĝin timo
antaŭ ili. 39 Li etendis nubon, kiel kovron; Kaj fajron,
por ke ĝi lumu en la nokto. 40 Ili petis, kaj Li sendis
koturnojn, Kaj per pano ĉiela Li ilin satigis. 41 Li
malfermis rokon, Kaj ekfluis akvo kaj ekiris kiel rivero
en la dezerto. 42 Ĉar Li memoris Sian sanktan vorton
Al Abraham, Sia sklavo. 43 Kaj Li elkondukis Sian
popolon en ĝojo, Siajn elektitojn kun kantado. 44 Kaj
Li donis al ili la landojn de popoloj, Kaj la laboron de
gentoj ili heredis; 45 Por ke ili plenumu Liajn leĝojn
Kaj konservu Liajn instruojn. Haleluja!

**106** Haleluja! Gloru la Eternulon, ĉar Li estas bona;
Ĉar eterna estas Lia boneco. 2 Kiu eldiros la
potencon de la Eternulo, Aŭdigos Lian tutan gloron?
3 Bone estas al tiuj, kiuj observas justecon, Kiuj agas
bone en ĉiu tempo. 4 Memoru min, ho Eternulo, pro
favoro al Via popolo; Sendu al mi Vian savon, 5 Por
ke mi vidu la bonstaton de Viaj elektitoj, Por ke mi
ĝoju kun la ĝojo de Via popolo, Por ke mi triumfu

kun Via heredo. 6 Ni pekis kune kun niaj patroj, Ni
malbonagis, ni malvirtis. 7 Niaj patroj en Egiptujo
ne komprenis Viajn miraklojn, Ne memoris Vian
grandan bonecon; Kaj ili ribelis apud la maro, apud
la Ruĝa Maro. 8 Sed Li savis ilin pro Sia nomo, Por
montri Sian potencon. 9 Kaj Li ekkriis al la Ruĝa Maro,
kaj ĝi elsekiĝis; Kaj Li kondukis ilin tra la abismoj,
kiel tra la dezerto. 10 Kaj Li savis ilin el la mano de
la malamanto, Kaj Li liberigis ilin en la mano de la
malamiko. 11 Kaj la akvo kovris iliajn kontraŭulojn; Eĉ
unu el ili ne restis. 12 Tiam ili ekkredis al Liaj vortoj,
Ili ekkantis Lian gloron. 13 Sed baldaŭ ili forgesis
Liajn farojn, Ili ne fidis Lian konsilon. 14 Ili fordonis
sin al siaj kapricoj en la dezerto, Kaj ili incitis Dion
en la stepo. 15 Kaj Li plenumis ilian deziron, Sed Li
sendis pereon al iliaj animoj. 16 Ili enviis Moseon en
la tendaro, Aaronon, sanktulon de la Eternulo. 17
Malfermiĝis la tero kaj englutis Datanon, Kaj kovris
la anaron de Abiram. 18 Kaj ekbrulis fajro en ilia
anaro, Flamo forbruligis la malvirtulojn. 19 Ili faris
bovidon ĉe Ĥoreb, Kaj adorkliniĝis antaŭ fandaĵo. 20
Ili ŝanĝis sian honoron En bildon de bovo, kiu manĝas
herbon. 21 Ili forgesis Dion, sian savanton, Kiu faris
grandajn farojn en Egiptujo, 22 Miraklojn en la lando
de Ĥam, Timindaĵojn apud la Ruĝa Maro. 23 Kaj Li
decidis ekstermi ilin; Sed Moseo, Lia elektito, stariĝis
antaŭ Li ĉe la fendo, Por forklini Lian koleregon, ke
Li ilin ne ekstermu. 24 Kaj ili malŝatis la dezirindan
landon, Ili ne kredis al Lia vorto. 25 Ili murmuris en
siaj tendoj, Kaj ne aŭskultis la voĉon de la Eternulo.
26 Tial Li ĵuris al ili per levo de Sia mano, Por faligi ilin
en la dezerto, 27 Kaj por disfaligi ilian semon inter la
popoloj, Kaj disĵeti ilin en la landojn. 28 Kaj ili aliĝis
al Baal-Peor, Kaj manĝis oferricevojn de malvivuloj.
29 Kaj ili kolerigis Lin per siaj faroj; Kaj disvastiĝis
inter ili epidemio. 30 Kaj stariĝis Pineĥas kaj aranĝis
juĝon; Kaj la epidemio haltis. 31 Kaj tio estas kalkulita
al li kiel bonfaro, Por ĉiuj generacioj kaj eterne. 32
Kaj ili kolerigis Lin ĉe la akvo de Meriba, Kaj pro ili
fariĝis malbono al Moseo; 33 Ĉar ili maldolĉigis lian
spiriton, Kaj li eldiris ion nepripensitan per sia buŝo.
34 Ili ne ekstermis la popolojn, Pri kiuj diris al ili la
Eternulo; 35 Sed ili miksiĝis kun la popoloj Kaj lernis
iliajn farojn; 36 Ili servis al iliaj idoloj, Kaj ĉi tiuj fariĝis
reto por ili. 37 Kaj ili oferdonis siajn filojn kaj filinojn
al demonoj; 38 Kaj ili verŝis senkulpan sangon, la
sangon de siaj filoj kaj filinoj, Kiujn ili oferportis al la
Kanaanaj idoloj; Kaj la tero malpuriĝis de sango. 39
Kaj ili malpuriĝis per siaj faroj, Kaj malĉastiĝis per
siaj agoj. 40 Kaj ekflamis la kolero de la Eternulo
kontraŭ Lia popolo, Kaj Li abomenis Sian heredon; 41
Kaj Li donis ilin en la manojn de idolanoj, Kaj iliaj
malamantoj ekregis super ili. 42 Kaj premis ilin iliaj
malamikoj, Kaj sub la manoj de ĉi tiuj ili humiliĝis. 43
Multajn fojojn Li ilin savis; Sed ili ribeladis per siaj
entreprenoj, Kaj ili senfortiĝis pro sia krimeco. 44
Sed Li ekrigardis ilian suferon, Kiam Li aŭdis ilian
kriadon; 45 Kaj Li rememoris Sian interligon kun ili,
Kaj Li ekbedaŭris laŭ Sia granda favorkoreco; 46 Kaj Li
aperigis kompaton por ili Ĉe ĉiuj iliaj malliberigintoj.
47 Savu nin, ho Eternulo, nia Dio, Kaj kolektu nin el
inter la popoloj, Por glori Vian sanktan nomon, Por
triumfi pro Via gloro. 48 Glorata estu la Eternulo, Dio
de Izrael, de eterne ĝis eterne. Kaj la tuta popolo diru:
Amen. Haleluja!

**107** Gloru la Eternulon, ĉar Li estas bona; Ĉar
eterna estas Lia boneco: 2 Diru la liberigitoj de
la Eternulo, Kiujn Li liberigis el la mano de malamiko,
3 Kiujn Li kolektis el la landoj, De oriento kaj okcidento,
De nordo kaj de la maro. 4 Ili vagis en la dezerto, laŭ
vojo senviva, Urbon loĝatan ili ne trovis; 5 Ili malsatis
kaj soifis, Ilia animo en ili senfortiĝis. 6 Sed ili ekkriis
al la Eternulo en sia sufero, Kaj Li liberigis ilin el ilia
mizero. 7 Kaj Li kondukis ilin laŭ ĝusta vojo, Ke ili
venu al urbo loĝata. 8 Ili gloru la Eternulon por Lia
boneco, Kaj por Liaj mirakloj antaŭ la homidoj. 9 Ĉar
Li satigis animon soifantan, Kaj animon malsatan
Li plenigis per bonaĵo. 10 Ili sidis en mallumo kaj
en ombro de morto, Katenitaj de mizero kaj fero;
11 Ĉar ili malobeis la vortojn de Dio Kaj malŝatis la
decidon de la Plejaltulo. 12 Kaj Li frapis ilian koron
per sufero; Ili falis, kaj neniu helpis. 13 Sed ili ekkriis
al la Eternulo en sia sufero, Kaj Li liberigis ilin el
ilia mizero. 14 Li eligis ilin el mallumo kaj ombro
de morto, Kaj iliajn ligilojn Li disŝiris. 15 Ili gloru la
Eternulon por Lia boneco, Kaj por Liaj mirakloj antaŭ
la homidoj. 16 Ĉar Li rompis kuprajn pordojn, Kaj
disbatis ferajn riglilojn. 17 La malsaĝuloj suferis pro
siaj pekaj vojoj Kaj pro siaj krimoj; 18 Ĉiujn manĝojn
abomenis ilia animo, Kaj ili atingis la pordegon de la
morto. 19 Sed ili ekkriis al la Eternulo en sia sufero,
Kaj Li liberigis ilin el ilia mizero. 20 Li sendis Sian
vorton, Kaj Li sanigis ilin kaj savis ilin de la tombo.

21 Ili gloru la Eternulon por Lia boneco, Kaj por Liaj
mirakloj antaŭ la homidoj. 22 Kaj ili oferdonu dankajn
oferojn, Kaj rakontu Liajn farojn kun kantado. 23
Kiuj veturas per ŝipoj sur la maro, Kiuj komercas sur
grandaj akvoj, 24 Tiuj vidis la farojn de la Eternulo
Kaj Liajn miraklojn en la profundo. 25 Li diris, kaj
aperis granda ventego Kaj alte levis ĝiajn ondojn: 26
Ili leviĝas ĝis la ĉielo, malleviĝas en la abismojn; Ilia
animo konsumiĝas de sufero; 27 Ili iras ĉirkaŭe kaj
ŝanceliĝas kiel ebriulo, Kaj ilia tuta saĝeco malaperas.
28 Sed ili ekkriis al la Eternulo en sia sufero, Kaj Li
eligis ilin el ilia mizero. 29 Li kvietigis la ventegon, Kaj
ĝiaj ondoj silentiĝis. 30 Kaj ili ekĝojis, kiam fariĝis
silente; Kaj Li alkondukis ilin al la dezirata haveno.
31 Ili gloru la Eternulon por Lia boneco, Kaj por Liaj
mirakloj antaŭ la homidoj. 32 Kaj ili altigu Lin en
popola kunveno, Kaj en kunsido de plejaĝuloj ili Lin
laŭdu. 33 Li ŝanĝas riverojn en dezerton, Kaj fontojn
de akvo en sekaĵon; 34 Fruktoportan teron en salan
dezerton, Pro la malboneco de ĝiaj loĝantoj. 35 Li
ŝanĝas dezerton en lagon, Kaj sekan teron en fontojn
de akvo; 36 Kaj Li loĝigas tie malsatulojn, Kaj ili
konstruas urbon loĝatan. 37 Kaj ili prisemas kampojn,
Plantas vinberujojn, kaj ricevas fruktojn. 38 Kaj Li ilin
benas, kaj ili tre multiĝas, Kaj brutoj ne mankas al ili.
39 Kaj kiam ili estas tre malmultaj kaj malfortaj Pro la
premanta malbono kaj mizero, 40 Li verŝas honton sur
eminentulojn, Kaj erarvagigas ilin en dezerto senvoja.
41 Malriĉulon Li altigas el mizero, Kaj kreas familiojn
kiel ŝafojn. 42 La virtuloj tion vidas, kaj ĝojas; Kaj ĉia
malboneco fermas sian buŝon. 43 Kiu estas saĝa, tiu
tion observu, Kaj oni komprenu la favoraĵojn de la
Eternulo.

**108** Kanto. Psalmo de David. Fortika estas mia
koro, ho Dio; Mi kantos kaj gloros kun mia
honoro. 2 Vekiĝu, psaltero kaj harpo; Mi vekos la
matenan ĉielruĝon. 3 Mi gloros Vin, ho Eternulo,
inter la popoloj; Kaj mi prikantos Vin inter la gentoj.
4 Ĉar granda ĝis super la ĉielo estas Via boneco, Kaj
ĝis la nuboj estas Via vero. 5 Altiĝu super la ĉielo, ho
Dio; Kaj Via gloro estu super la tuta tero. 6 Por ke
liberiĝu viaj amatoj, Helpu per Via dekstra mano, kaj
aŭskultu min. 7 Dio diris en Sia sanktejo: Mi triumfos;
Mi dividos Ŝeĥemon, kaj la valon Sukot Mi mezuros.
8 Al Mi apartenas Gilead, al Mi apartenas Manase;
Efraim estas la forto de Mia kapo, Jehuda estas Mia
sceptro. 9 Moab estas Mia lavopelvo; Sur Edomon
Mi ĵetos Mian ŝuon; Super Filiŝtujo Mi triumfe krios.
10 Kiu enkondukos min en fortikigitan urbon? Kiu
alkondukos min ĝis Edom? 11 Ĉu ne Vi, ho Dio, forlasis
nin? Vi ne eliras, ho Dio, kun niaj militistaroj. 12
Donu al ni helpon kontraŭ la malamiko; Vanta estas
helpo de homo. 13 Kun Dio ni faros heroaĵojn; Kaj Li
dispremos niajn malamikojn.

**109** Al la Ĥorestro. Psalmo de David. Ho Dio, mia
gloro, ne silentu. 2 Ĉar buŝon malvirtan kaj
buŝon malican ili malfermis kontraŭ mi, Ili parolas
kun mi per mensogema lango. 3 Per vortoj de malamo
ili min ĉirkaŭis, Kaj ili militas kontraŭ mi sen mia
kulpo. 4 Por mia amo ili min malamas; Sed mi preĝas.
5 Ili pagas al mi malbonon por bono Kaj malamon por
mia amo. 6 Metu malvirtulon super lin; Kaj kontraŭulo
stariĝu ĉe lia dekstra mano. 7 Kiam li estos juĝata,
li eliru kulpa; Kaj lia preĝo estu peko. 8 Liaj tagoj
estu malmultaj; Lian oficon ricevu alia. 9 Liaj infanoj
estu orfoj, Kaj lia edzino estu vidvino. 10 Liaj infanoj
vagadu, Kaj ili petu kaj serĉu apud siaj ruinoj. 11
Kreditoro forprenu ĉion, kion li havas; Kaj fremduloj
disrabu lian laboron. 12 Neniu faru al li ion bonan;
Kaj ne troviĝu kompatanto por liaj orfoj. 13 Lia idaro
estu kondamnita al ekstermo; En la dua generacio
elviŝiĝu ilia nomo. 14 La malbonago de liaj patroj
rememoriĝu al la Eternulo, Kaj la peko de lia patrino
ne elviŝiĝu. 15 Ili estu ĉiam antaŭ la Eternulo, Kaj Li
ekstermu la memoron pri ili de sur la tero. 16 Pro tio,
ke li ne memoris fari bonfarojn, Kaj ke li persekutis
mizerulon kaj malriĉulon kaj korsuferanton, Por lin
mortigi. 17 Li amis malbenon, kaj ĝi venis sur lin;
Li ne volis benon, kaj ĝi malproksimiĝis de li. 18 Li
metis sur sin malbenon, kiel veston; Kaj ĝi penetris en
lian internon, kiel akvo, Kaj en liajn ostojn, kiel oleo.
19 Ĝi estu por li kiel vesto, per kiu li sin kovras, Kaj
kiel zono, kiun li ĉiam portas ĉirkaŭ si. 20 Tia estas
de la Eternulo la agado kontraŭ miaj kontraŭuloj,
Kaj kontraŭ tiuj, kiuj parolas malbonon kontraŭ mia
animo. 21 Kaj Vi, ho Eternulo, mia Sinjoro, agu kun
mi pro Via nomo; Ĉar bona estas Via favorkoreco,
savu min. 22 Ĉar mi estas malriĉulo kaj mizerulo,
Kaj mia koro estas rompita en mia interno. 23 Kiel
ombro longiĝanta mi malaperas; Oni forskuas min
kiel akridon. 24 Miaj genuoj senfortiĝis de fastado, Kaj
mia karno perdis la grason. 25 Kaj mi fariĝis mokataĵo

por ili; Kiam ili vidas min, ili balancas sian kapon. 26
Helpu min, ho Eternulo, mia Dio; Savu min laŭ Via
boneco. 27 Kaj oni sciu, ke tio estas Via mano; Ke Vi,
ho Eternulo, tion faris. 28 Ili malbenas, sed Vi benu;
Ili leviĝis, sed ili estos hontigitaj, kaj Via sklavo ĝojos.
29 Miaj kontraŭuloj kovriĝu per malhonoro, Kaj ili
envolviĝu en sian honton kiel en veston. 30 Mi forte
gloros la Eternulon per mia buŝo, Kaj meze de multaj
homoj mi Lin laŭdos. 31 Ĉar Li staras ĉe la dekstra
flanko de malriĉulo, Por savi lin de tiuj, kiuj juĝas lian
animon.

**110** Psalmo de David. La Eternulo diris al mia
sinjoro: Sidu dekstre de Mi, Ĝis Mi faros viajn
malamikojn benketo por viaj piedoj. 2 La sceptron de
via potenco la Eternulo sendos el Cion: Regu inter
viaj malamikoj. 3 En la tago de via potenco via popolo
volonte sin donas al vi en sankta ornamo. De la
komenco de matenruĝo aliĝas al vi la roso de via
junularo. 4 La Eternulo ĵuris, kaj ne pentos; Vi estas
pastro por ĉiam, Laŭ la maniero de Melkicedek. 5 La
Sinjoro ĉe via dekstra flanko Frapas reĝojn en la tago
de Sia kolero. 6 Li juĝos inter la popoloj, inter plene
da kadavroj; Li frakasos la ĉefon de granda lando. 7 Li
trinkos el rivero sur la vojo; Tial li levos la kapon.

**111** Haleluja! Mi gloras la Eternulon per mia tuta
koro, En rondo de piuloj kaj en kunveno. 2
Grandaj estas la faroj de la Eternulo, Serĉataj de ĉiuj,
kiuj ilin amas. 3 Bela kaj majesta estas Lia verko,
Kaj Lia justeco restas eterne. 4 Memorindaj Li faris
Siajn miraklojn; Kompatema kaj favorkora estas la
Eternulo. 5 Li donas manĝon al tiuj, kiuj Lin timas;
Li memoras eterne Sian interligon. 6 La potencon
de Siaj fortoj Li aperigis al Sia popolo, Doninte al ili
la heredon de gentoj. 7 La faroj de Liaj manoj estas
vero kaj justeco; Perfektaj estas ĉiuj Liaj ordonoj; 8 Ili
estas fortikaj por eterne, Faritaj per vero kaj honesto.
9 Liberigon Li sendis al Sia popolo; Li aranĝis por
ĉiam Sian interligon. Sankta kaj respektinda estas
Lia nomo. 10 Komenco de saĝeco estas timo antaŭ la
Eternulo; Bonan prudenton havas ĉiuj plenumantoj.
Lia gloro restas eterne.

**112** Haleluja! Bone estas al la homo, kiu timas la
Eternulon Kaj tre amas Liajn ordonojn. 2 Forta
sur la tero estos lia semo; La gento de virtuloj estos
benita. 3 Bonstato kaj riĉeco estas en lia domo; Kaj lia
justeco restas eterne. 4 En mallumo leviĝas lumo por
la virtulo. Li estas kompatema, favorkora, kaj justa. 5
Bone estas al la homo, kiu kompatas kaj pruntedonas,
Kiu pesas siajn farojn per justeco. 6 Ĉar neniam li
falos; Virtulo estos memorata eterne. 7 Malbonan
famon li ne timos; Fortika estas lia koro, ĝi fidas la
Eternulon. 8 Senŝanceliĝa estas lia koro; Li ne timas,
ĝis li vidas la pereon de siaj malamikoj. 9 Li ŝutas kaj
donas al la malriĉuloj; Lia justeco restas eterne, Lia
korno altiĝos en honoro. 10 La malvirtulo vidas kaj
ĉagreniĝas, Kunfrapas la dentojn kaj konsumiĝas. La
deziro de malvirtuloj pereos.

**113** Haleluja! Gloru, sklavoj de la Eternulo, Gloru
la nomon de la Eternulo. 2 La nomo de la
Eternulo estu benata De nun kaj eterne. 3 De la
leviĝejo de la suno ĝis ĝia malleviĝejo Estas glorata la
nomo de la Eternulo. 4 Alte super ĉiuj popoloj estas la
Eternulo; Super la ĉielo estas Lia gloro. 5 Kiu estas
kiel la Eternulo, nia Dio, Kiu sidas alte, 6 Kiu kliniĝas
por rigardi La ĉielon kaj la teron, 7 Kiu el la polvo
restarigas mizerulon, El la koto levas malriĉulon, 8
Por sidigi lin kun eminentuloj, Kun la eminentuloj de
lia popolo? 9 Li donas familion al senfruktulino, Kaj
faras ŝin ĝoja patrino de infanoj. Haleluja!

**114** Kiam Izrael eliris el Egiptujo, La domo de Jakob
el fremda popolo, 2 Tiam Jehuda fariĝis Lia
sanktaĵo, Izrael Lia regno. 3 La maro vidis kaj forkuris,
Jordan turniĝis malantaŭen; 4 La montoj saltis kiel
ŝafoj, La montetoj kiel ŝafidoj. 5 Kio estas al vi, ho maro,
ke vi forkuris? Jordan, kial vi turniĝis malantaŭen? 6
Montoj, kial vi saltas kiel ŝafoj, Montetoj, kiel ŝafidoj?
7 Antaŭ la Sinjoro tremu, ho tero, Antaŭ la Dio de
Jakob, 8 Kiu ŝanĝas rokon en lagon da akvo, Graniton
en akvodonan fonton.

**115** Ne al ni, ho Eternulo, ne al ni, Sed al Via nomo
donu honoron, Pro Via favorkoreco, pro Via
vereco. 2 Kial devas diri la popoloj: Kie do estas ilia
Dio? 3 Sed nia Dio estas en la ĉielo; Ĉion, kion Li
deziras, Li faras. 4 Iliaj idoloj estas arĝento kaj oro,
Faritaĵo de homaj manoj. 5 Buŝon ili havas, sed ne
parolas; Okulojn ili havas, sed ne vidas; 6 Orelojn ili
havas, sed ne aŭdas; Nazon ili havas, sed ne flaras;
7 Manojn ili havas, sed ne palpas; Piedojn ili havas,
sed ne iras; Ili ne donas sonon per sia gorĝo. 8 Kiel
ili, tiel estos iliaj farantoj, Ĉiuj, kiuj ilin fidas. 9 Ho

Izrael, fidu la Eternulon; Li estas ilia helpo kaj ŝildo.
10 Ho domo de Aaron, fidu la Eternulon; Li estas ilia
helpo kaj ŝildo. 11 Ho timantoj de la Eternulo, fidu la
Eternulon; Li estas ilia helpo kaj ŝildo. 12 La Eternulo
nin memoras, Li benas, Li benas la domon de Izrael, Li
benas la domon de Aaron; 13 Li benas la timantojn
de la Eternulo, La malgrandajn kaj la grandajn. 14 La
Eternulo vin multigu, Vin kaj viajn infanojn. 15 Vi
estas benitaj de la Eternulo, Kiu faris la ĉielon kaj la
teron. 16 La ĉielo estas ĉielo de la Eternulo, Sed la
teron Li donis al la homidoj. 17 Ne la mortintoj gloros
la Eternulon, Kaj ne tiuj, kiuj foriris en la silentejon. 18
Sed ni benos la Eternulon De nun kaj eterne. Haleluja!

**116** Mi amas, ke la Eternulo aŭdas mian voĉon Kaj
mian petegon, 2 Ke Li klinis Sian orelon al mi;
Kaj en miaj tagoj mi Lin vokos. 3 Ĉirkaŭis min la ondoj
de la morto, Kaj turmentoj de Ŝeol min trafis; Suferon
kaj ĉagrenon mi trovis. (Sheol h7585) 4 Sed la nomon de
la Eternulo mi vokis: Ho Eternulo, savu mian animon.
5 Favorkora estas la Eternulo kaj justa, Kaj nia Dio estas
kompatema. 6 La Eternulo gardas la simplanimulojn;
Mi estis en mizero, kaj Li min savis. 7 Revenu, ho mia
animo, al via trankvileco, Ĉar la Eternulo faris al vi
bonon. 8 Ĉar Vi savis mian animon de la morto, Miajn
okulojn de larmoj, Miajn piedojn de falpuŝiĝo. 9 Mi
irados antaŭ la Eternulo En la lando de la vivo. 10
Kun kredo mi diris: Mi estas tre afliktita. 11 Mi diris
en mia konfuziĝo: Ĉu homo mensogas. 12 Kion mi
redonu al la Eternulo Por ĉiuj Liaj bonfaroj al mi? 13
Mi levos la pokalon de savo, Kaj mi vokos la nomon
de la Eternulo. 14 Miajn promesojn al la Eternulo mi
plenumos Antaŭ Lia tuta popolo. 15 Grandvalora en la
okuloj de la Eternulo Estas la morto de Liaj fideluloj.
16 Ho Eternulo, mi ja estas Via sklavo, Mi estas Via
sklavo, filo de Via sklavino; Vi disigis miajn ligilojn. 17
Al Vi mi oferdonos dankan oferon, Kaj la nomon de la
Eternulo mi vokos. 18 Miajn promesojn al la Eternulo
mi plenumos Antaŭ Lia tuta popolo, 19 En la kortoj de
la domo de la Eternulo, Interne de vi, ho Jerusalem.

**117** Haleluja! Gloru la Eternulon ĉiuj popoloj, Laŭdu
Lin ĉiuj gentoj; 2 Ĉar granda estas Lia boneco
al ni, Kaj la vero de la Eternulo restas eterne.

**118** Haleluja! Gloru la Eternulon, ĉar Li estas bona;
Ĉar eterna estas Lia boneco. 2 Izrael diru, Ke
eterna estas Lia boneco. 3 La domo de Aaron diru, Ke
eterna estas Lia boneco. 4 La timantoj de la Eternulo
diru, Ke eterna estas Lia boneco. 5 El premateco mi
vokis al la Eternulo, Kaj per liberigo respondis al mi la
Eternulo. 6 La Eternulo estas kun mi, mi ne timas; Kion
faros al mi homo? 7 La Eternulo estas kun mi, kiel mia
helpanto; Kaj mi triumfos super miaj malamikoj. 8 Pli
bone estas fidi la Eternulon, Ol fidi homon. 9 Pli bone
estas fidi la Eternulon, Ol fidi eminentulojn. 10 Ĉiuj
popoloj min ĉirkaŭis, Sed per la nomo de la Eternulo
mi ilin disbatos. 11 Ili ĉirkaŭis min de ĉiuj flankoj,
Sed per la nomo de la Eternulo mi ilin disbatos. 12 Ili
ĉirkaŭis min kiel abeloj, Sed ili estingiĝas, kiel fajro
en dornoj; Per la nomo de la Eternulo mi ilin disbatos.
13 Oni min puŝis, ke mi falu; Sed la Eternulo min
helpis. 14 La Eternulo estas mia forto kaj mia kanto,
Kaj Li fariĝis mia savo. 15 La voĉo de triumfo kaj de
saviĝo sonas en la tendoj de la virtuloj: La dekstra
mano de la Eternulo faras heroaĵojn; 16 La dekstra
mano de la Eternulo estas alte, La dekstra mano de
la Eternulo faras heroaĵojn. 17 Mi ne mortos, sed mi
vivos, Kaj mi rakontos la farojn de la Eternulo. 18 Per
forta puno punadis min la Eternulo, Sed al la morto
Li min ne donis. 19 Malfermu al mi la pordegojn de
la vero; Mi iros tra ili, mi gloros la Eternulon. 20 Jen
estas la pordego de la Eternulo; Virtuloj iras tra ĝi. 21
Mi dankas Vin, Ĉar Vi aŭskultis min kaj fariĝis mia
savo. 22 Ŝtono, kiun malŝatis la konstruantoj, Fariĝis
ŝtono bazangula. 23 De la Eternulo ĉi tio fariĝis, Ĝi
estas miraklo en niaj okuloj. 24 Ĉi tiun tagon faris
la Eternulo; Ni ĝoju kaj gajiĝu en ĝi. 25 Ho Eternulo,
helpu! Ho Eternulo, sukcesigu! 26 Estu benata tiu,
kiu venas en la nomo de la Eternulo! Ni benas vin
el la domo de la Eternulo. 27 La Eternulo estas Dio,
kaj Li lumas al ni. Aranĝu la festan procesion kun
branĉoj ĝis la kornoj de la altaro. 28 Vi estas mia Dio,
kaj mi Vin gloras; Mia Dio, Vin mi altigas. 29 Gloru
la Eternulon, ĉar Li estas bona; Ĉar eterna estas Lia
boneco.

**119** Bone estas al tiuj, kies vojo estas senmakula,
Kiuj iras laŭ la leĝo de la Eternulo. 2 Bone
estas al tiuj, kiuj plenumas Liajn decidojn, Kiuj serĉas
Lin per la tuta koro; 3 Ili ne faras malbonagon, Ili
iras laŭ Liaj vojoj. 4 Vi ordonis al ni, Forte observi
Viajn leĝojn. 5 Ho, estu fortikaj miaj vojoj, Ke mi
observu Viajn leĝojn! 6 Tiam mi ne bezonos honti,
Kiam mi atentos ĉiujn Viajn ordonojn. 7 Mi gloros

Vin el pura koro, Lernante la juĝojn de Via justeco. 8
Viajn leĝojn mi observos; Ne forlasu min tute. 9 Per
kio junulo povas purigi sian vojon? Per plenumado
laŭ Viaj vortoj. 10 Per mia tuta koro mi Vin serĉas;
Ne lasu min deflankiĝi de Viaj ordonoj. 11 En mia
koro mi konservas Vian diron, Por ke mi ne peku
antaŭ Vi. 12 Benata Vi estas, ho Eternulo; Instruu
al mi Viajn leĝojn. 13 Per miaj lipoj mi rakontas
Ĉiujn decidojn de Via buŝo. 14 Pri la vojo de Viaj
leĝoj mi ĝojas, Kiel pri granda riĉeco. 15 Pri Viaj
ordonoj mi meditas, Kaj mi rigardas Viajn vojojn.
16 Mi havas plezuron de Viaj leĝoj, Mi ne forgesas
Vian vorton. 17 Bonfaru al Via sklavo, Ke mi vivu kaj
plenumu Vian vorton. 18 Malfermu miajn okulojn,
Ke mi vidu miraklojn de Via instruo. 19 Migranto mi
estas sur la tero; Ne kaŝu antaŭ mi Viajn ordonojn. 20
Elturmentiĝis mia animo De senĉesa sintirado al Viaj
juĝoj. 21 Vi humiligas la malbenitajn fierulojn, Kiuj
dekliniĝas de Viaj ordonoj. 22 Forigu de mi honton kaj
malhonoron, Ĉar mi observas Viajn decidojn. 23 Eĉ
kiam sidas eminentuloj kaj parolas kontraŭ mi, Via
sklavo meditas pri Viaj leĝoj. 24 Viaj decidoj estas mia
plezuro, Miaj konsilantoj. 25 Mia animo algluiĝis al la
polvo; Vivigu min laŭ Via vorto. 26 Mi raportis pri
miaj vojoj, kaj Vi aŭskultis min; Instruu al mi Viajn
leĝojn. 27 Komprenigu al mi la vojon de Viaj ordonoj;
Kaj mi meditos pri Viaj mirakloj. 28 Konsumiĝis mia
animo pro malĝojo; Restarigu min laŭ Via vorto. 29 La
vojon de malvero deturnu de mi, Kaj donacu al mi
Vian instruon. 30 La vojon de la vero mi elektis, Mi
sopiris al Viaj leĝoj. 31 Mi alkroĉiĝis al Viaj ordonoj;
Ho Eternulo, ne hontigu min. 32 Mi kuras laŭ la vojo
de Viaj leĝoj, Ĉar Vi larĝigas mian koron. 33 Montru
al mi, ho Eternulo, la vojon de Viaj leĝoj, Kaj mi ĝin
sekvos ĝis la fino. 34 Komprenigu al mi, kaj mi sekvos
Vian instruon, Kaj mi konservos ĝin per la tuta koro.
35 Irigu min sur la vojeto de Viaj ordonoj, Ĉar en ĝi
mi havas plezuron. 36 Klinu mian koron al Viaj leĝoj,
Sed ne al profito. 37 Deturnu miajn okulojn, ke ili ne
rigardu falsaĵon; Vivigu min per Viaj vojoj. 38 Plenumu
al Via sklavo Vian diron, Kiu koncernas respekton
por Vi. 39 Forigu mian malhonoron, kiun mi timas;
Ĉar Viaj juĝoj estas bonaj. 40 Jen mi deziregas Viajn
ordonojn; Per Via justeco vivigu min. 41 Kaj venu al
mi Viaj favoroj, ho Eternulo, Via helpo, konforme
al Via vorto, 42 Ke mi povu doni respondon al mia
insultanto; Ĉar mi fidas Vian vorton. 43 Ne forprenu
tute de mia buŝo la vorton de vero, Ĉar mi esperas al
Viaj juĝoj. 44 Kaj mi konservos Vian instruon Ĉiam
kaj eterne. 45 Kaj mi iros en libereco, Ĉar mi serĉas
Viajn ordonojn. 46 Kaj mi parolos pri Viaj leĝoj antaŭ
reĝoj, Kaj mi ne hontos. 47 Kaj mi havos plezuron
de Viaj ordonoj, Kiujn mi amas. 48 Kaj mi etendos
miajn manojn al Viaj ordonoj, kiujn mi amas, Kaj mi
meditos pri Viaj leĝoj. 49 Rememoru la vorton al Via
sklavo, Pri kio Vi min esperigis. 50 Ĉi tio estas mia
konsolo en mia mizero, Ke Via vorto min revivigas.
51 Fieruloj tre forte min mokas, Sed de Via instruo
mi ne dekliniĝis. 52 Mi rememoras Viajn juĝojn de
tempoj tre antikvaj, ho Eternulo, Kaj mi konsoliĝas.
53 Flama furiozo min kaptas pro la malvirtuloj, Kiuj
forlasas Vian leĝon. 54 Viaj leĝoj estas por mi kantoj
En la domo de mia migrado. 55 Mi rememoras en la
nokto Vian nomon, ho Eternulo, Kaj mi plenumas
Vian instruon. 56 Tio fariĝis al mi, Ĉar mi observas
Viajn ordonojn. 57 Mi diris: Mia sortaĵo estas, ho
Eternulo, Plenumi Viajn vortojn. 58 Mi petegas antaŭ
Vi per la tuta koro: Korfavoru min, konforme al Via
vorto. 59 Mi esploris miajn vojojn Kaj direktis miajn
paŝojn al Viaj leĝoj. 60 Mi rapidas kaj ne prokrastas,
Por plenumi Viajn ordonojn. 61 Retoj de malvirtuloj
min ĉirkaŭis; Sed Vian instruon mi ne forgesis. 62
En la mezo de la nokto mi leviĝas, Por glori Vin por
Viaj justaj juĝoj. 63 Mi estas kamarado por ĉiuj, Kiuj
Vin timas kaj kiuj observas Viajn ordonojn. 64 De Via
boneco, ho Eternulo, la tero estas plena; Instruu al
mi Viajn leĝojn. 65 Bonon Vi faris al Via sklavo, ho
Eternulo, Konforme al Via vorto. 66 Bonajn morojn kaj
scion instruu al mi, Ĉar al Viaj ordonoj mi kredas. 67
Antaŭ ol mi suferis, mi erarvagis, Sed nun mi observas
Vian vorton. 68 Vi estas bona kaj bonfara; Instruu al
mi Viajn leĝojn. 69 Fieruloj plektis mensogon pri mi;
Sed mi per la tuta koro konservas Viajn ordonojn. 70
Grasiĝis kiel sebo ilia koro; Sed mi havas plezuron de
Via instruo. 71 Bone estas al mi, ke mi suferis, Por
ke mi lernu Viajn leĝojn. 72 Pli bona estas por mi la
instruo de Via buŝo, Ol miloj da oreroj kaj arĝenteroj.
73 Viaj manoj min kreis kaj fortikigis; Prudentigu min,
kaj mi lernu Viajn ordonojn. 74 Viaj timantoj min
vidos kaj ĝojos, Ĉar mi fidis Vian vorton. 75 Mi scias,
ho Eternulo, ke Viaj juĝoj estas justaj, Kaj ke Vi juste
min suferigis. 76 Via boneco estu do mia konsolo,
Konforme al Via vorto al Via sklavo. 77 Venu sur min
Via favorkoreco, ke mi vivu; Ĉar Via instruo estas

mia plezuro. 78 Hontiĝu la fieruloj, ĉar maljuste ili
min premis; Mi meditos pri Viaj ordonoj. 79 Turniĝu
al mi Viaj timantoj Kaj la konantoj de Viaj leĝoj.
80 Mia koro estu ĝusta, laŭ Viaj leĝoj, Por ke mi ne
hontiĝu. 81 Mia animo avidas Vian savon; Vian vorton
mi fidas. 82 Miaj okuloj avidas Vian vorton, dirante:
Kiam Vi min konsolos? 83 Ĉar mi fariĝis kiel felsako
en fumo; Sed Viajn leĝojn mi ne forgesas. 84 Kiom
estos la tagoj de Via sklavo? Kiam Vi faros juĝon
super miaj persekutantoj? 85 Fosojn fosis al mi la
fieruloj, Kontraŭe al Viaj leĝoj. 86 Ĉiuj Viaj ordonoj
estas vero; Maljuste oni min persekutas; helpu min.
87 Oni preskaŭ pereigis min de sur la tero, Sed mi
ne forlasis Viajn ordonojn. 88 Laŭ Via boneco vivigu
min, Kaj mi observos la ordonojn de Via buŝo. 89
Por eterne, ho Eternulo, Via vorto staras forte en
la ĉielo. 90 Por ĉiuj generacioj restas Via vero; Vi
fortikigis la teron, kaj ĝi staras. 91 Laŭ Viaj leĝoj ĉio
nun staras, Ĉar ĉio estas Viaj sklavoj. 92 Se Via instruo
ne estus mia konsolo, Mi pereus en mia mizero. 93
Neniam mi forgesos Viajn ordonojn, Ĉar per ili Vi
min vivigas. 94 Al Vi mi apartenas; Helpu min, ĉar mi
serĉas Viajn ordonojn. 95 Pri mi embuskis malvirtuloj,
por min pereigi; Sed mi studas Viajn leĝojn. 96 Ĉe
ĉiu afero mi vidis finon; Sed Via ordono estas tre
vasta. 97 Kiel mi amas Vian instruon! La tutan tagon
mi meditas pri ĝi. 98 Via ordono faras min pli saĝa
ol miaj malamikoj, Ĉar ĝi restas al mi por ĉiam. 99
Mi fariĝis pli saĝa, ol ĉiuj miaj instruantoj, Ĉar Viaj
leĝoj estas mia tuta meditado. 100 Mi estas pli scianta
ol maljunuloj, Ĉar Viajn ordonojn mi konservas. 101
De ĉiu malbona vojo mi detenas mian piedon, Por
plenumi Vian vorton. 102 De Viaj decidoj mi ne
dekliniĝas, Ĉar Vi min gvidas. 103 Kiel dolĉa estas por
mia palato Via vorto! Pli ol mielo por mia buŝo! 104
De Viaj ordonoj mi prudentiĝas; Tial mi malamas ĉiun
vojon de malvero. 105 Via vorto estas lumilo por miaj
piedoj, Kaj lumo por mia vojo. 106 Mi ĵuris, kaj mi
plenumos: Observi Viajn justajn decidojn. 107 Mi estas
tre senfortigita, ho Eternulo; Vivigu min, konforme al
Via vorto. 108 La oferdono de mia buŝo plaĉu al Vi, ho
Eternulo, Kaj pri Viaj decidoj instruu min. 109 Mia
animo estas ĉiam en mia mano, Sed Vian instruon mi
ne forgesas. 110 La malvirtuloj metis reton por mi;
Sed de Viaj ordonoj mi ne dekliniĝis. 111 Mi heredigis
al mi Viajn ordonojn por ĉiam, Ĉar ili estas la ĝojo
de mia koro. 112 Mi klinis mian koron, Por plenumi
Viajn leĝojn eterne ĝis la fino. 113 Skeptikulojn mi
malamas, Sed Vian instruon mi amas. 114 Vi estas mia
ŝirmo kaj ŝildo; Vian vorton mi fidas. 115 Foriĝu de
mi, malbonagantoj; Mi observos la ordonojn de mia
Dio. 116 Subtenu min laŭ Via diro, ke mi vivu; Kaj ne
hontigu min pri mia espero. 117 Fortikigu min, ke mi
saviĝu, Kaj mi ĉiam havos plezuron de Viaj leĝoj. 118
Vi forpuŝas ĉiujn, kiuj dekliniĝas de Viaj leĝoj, Ĉar
ilia falsaĵo estas mensoga. 119 Kiel skorion Vi forĵetas
ĉiujn malvirtulojn sur la tero; Tial mi amas Viajn
decidojn. 120 De Via teruro tremas mia karno, Kaj
Viajn juĝojn mi timas. 121 Mi faris juĝon kaj justecon;
Ne transdonu min al miaj premantoj. 122 Garantie
liberigu Vian sklavon por bono, Por ke fieruloj min ne
premu. 123 Miaj okuloj sopiras Vian helpon Kaj Vian
justan vorton. 124 Agu kun Via sklavo laŭ Via boneco,
Kaj Viajn leĝojn instruu al mi. 125 Mi estas Via sklavo;
Klerigu min, ke mi sciu Viajn decidojn. 126 Estas
tempo, ke la Eternulo agu: Ili rompis Vian leĝon. 127
Tial mi amas Viajn ordonojn Pli ol oron, eĉ ol puran
oron. 128 Tial mi estimas ĉiujn Viajn ordonojn, Ĉiun
vojon de malvero mi malamas. 129 Mirindaj estas Viaj
decidoj; Tial mia animo ilin konservas. 130 Malkaŝo de
Via vorto klerigas, Ĝi prudentigas simplanimulojn.
131 Mi malfermas mian buŝon kaj enspiras, Ĉar mi
deziregas Viajn ordonojn. 132 Turnu Vin al mi kaj
korfavoru min, Kiel Vi agas kun la amantoj de Via
nomo. 133 Direktu miajn paŝojn laŭ Via promeso; Kaj
nenia malhonesteco ekregu super mi. 134 Liberigu min
de homa premado; Kaj mi observos Viajn ordonojn.
135 Lumu per Via vizaĝo sur Vian sklavon, Kaj instruu
al mi Viajn leĝojn. 136 Torentojn da akvo elverŝas miaj
okuloj, Pro tio, ke oni ne plenumas Vian instruon.
137 Justulo Vi estas, ho Eternulo, Kaj justaj estas Viaj
juĝoj. 138 Vi aperigis Viajn decidojn Kun justeco kaj
plena vero. 139 Elturmentis min mia fervoro, Ĉar
miaj malamikoj forgesis Viajn vortojn. 140 Tre pura
estas Via vorto, Kaj Via sklavo ĝin amas. 141 Mi estas
malgranda kaj malestimata; Sed Viajn ordonojn mi ne
forgesas. 142 Via justeco estas justeco eterna, Kaj Via
instruo estas vero. 143 Sufero kaj mizero min trafis;
Sed Viaj ordonoj estas mia plezuro. 144 La justeco de
Viaj decidoj estas eterna; Klerigu min, por ke mi vivu.
145 Mi vokas el la tuta koro; aŭskultu min, ho Eternulo;
Mi plenumos Viajn leĝojn. 146 Mi vokas al Vi; savu
min, Kaj mi konservos Viajn decidojn. 147 Antaŭ la
matenruĝo mi vokas; Vian vorton mi fidas. 148 Antaŭ

la noktaj gardopartoj miaj okuloj vekiĝas, Por ke
mi meditu pri Via vorto. 149 Mian voĉon aŭskultu,
laŭ Via boneco, ho Eternulo; Laŭ Via justeco lasu
min vivi. 150 Alproksimiĝas malicaj persekutantoj;
Malproksimaj ili estas de Via leĝo. 151 Proksima Vi
estas, ho Eternulo; Kaj ĉiuj Viaj ordonoj estas vero.
152 De longe mi scias pri Viaj decidoj, Ke Vi fiksis
ilin por ĉiam. 153 Rigardu mian mizeron, kaj liberigu
min, Ĉar Vian instruon mi ne forgesis. 154 Defendu
mian aferon, kaj liberigu min; Laŭ Via vorto lasu min
vivi. 155 Malproksima de malvirtuloj estas savo, Ĉar
ili ne ŝatas Viajn leĝojn. 156 Via favorkoreco estas
granda, ho Eternulo; Laŭ Via justeco lasu min vivi.
157 Multaj estas miaj persekutantoj kaj premantoj,
Sed de Viaj decidoj mi ne dekliniĝis. 158 Mi vidis
perfidulojn, kaj mi ilin abomenis, Ĉar Vian vorton ili
ne observis. 159 Rigardu, mi amas Viajn ordonojn; Ho
Eternulo, laŭ Via boneco lasu min vivi. 160 La esenco
de Via vorto estas vero, Kaj eterna estas ĉiu juĝo de
Via justeco. 161 Princoj persekutas min senkaŭze;
Sed Vian vorton timas mia koro. 162 Mi ĝojas pri Via
vorto, Kiel ricevinto de granda akiro. 163 Malveron mi
malamas kaj abomenas; Vian instruon mi amas. 164
Sepfoje ĉiutage mi Vin gloras Por Viaj justaj juĝoj.
165 Grandan pacon havas la amantoj de Via instruo;
Kaj ili ne falpuŝiĝas. 166 Mi atendas Vian savon, ho
Eternulo, Viajn ordonojn mi plenumas. 167 Mia animo
observas Viajn decidojn, Kaj mi ilin forte amas. 168
Mi observas Viajn ordonojn kaj decidojn, Ĉar ĉiuj
miaj vojoj estas antaŭ Vi. 169 Mia krio venu al Vi, ho
Eternulo; Laŭ Via vorto klerigu min. 170 Mia petego
venu al Vi; Laŭ Via diro savu min. 171 Miaj lipoj eldiru
gloradon, Ĉar Vi instruas al mi Viajn leĝojn. 172 Mia
lango predikos pri Via vorto, Ĉar ĉiuj Viaj ordonoj
estas justaj. 173 Via mano estu al mi helpo, Ĉar Viajn
ordonojn mi elektis. 174 Mi deziregas Vian savon, ho
Eternulo, Kaj Via instruo estas mia plezuro. 175 Mia
animo vivu kaj gloru Vin, Kaj Viaj juĝoj min helpu. 176
Mi erarvagis kiel perdita ŝafo; Elserĉu Vian sklavon,
ĉar Viajn ordonojn mi ne forgesis.

**120** Kanto de suprenirado. Al la Eternulo mi vokis
en mia sufero, Kaj Li aŭskultis min. 2 Ho
Eternulo, savu mian animon de mensoga parolo, De
falsa lango. 3 Kion Li donos al vi, Kaj kion Li alportos
al vi, ho falsa lango? 4 Akrajn sagojn de fortulo Kun
karboj genistaj. 5 Ve al mi, ke mi gastas en Meŝeĥ,
Ke mi loĝas inter la tendoj de Kedar! 6 Tro longe
loĝis mia animo Inter malamantoj de paco. 7 Mi estas
pacema; Sed kiam mi ekparolas, ili komencas militon.

**121** Kanto de suprenirado. Mi levas miajn okulojn
al la montoj: De kie venas al mi helpo? 2 Mia
helpo venas de la Eternulo, Kiu kreis la ĉielon kaj la
teron. 3 Li ne lasos vian piedon falpuŝiĝi; Via gardanto
ne dormetas. 4 Jen ne dormetas kaj ne dormas La
gardanto de Izrael. 5 La Eternulo estas via gardanto;
La Eternulo estas via ombro ĉe via dekstra mano. 6
En la tago la suno vin ne frapos, Nek la luno en la
nokto. 7 La Eternulo vin gardos de ĉia malbono, Li
gardos vian animon. 8 La Eternulo gardos vian eliron
kaj eniron, De nun kaj eterne.

**122** Kanto de suprenirado. De David. Mi ekĝojis,
kiam oni diris al mi: Ni iru en la domon de
la Eternulo. 2 Niaj piedoj staris en viaj pordegoj, Ho
Jerusalem, 3 Vi Jerusalem, konstruita kiel urbo, En
kiu ĉio kuniĝis. 4 Tien supreniris la triboj, la triboj de
la Eternulo, Laŭ la moro de Izrael, Por glori la nomon
de la Eternulo. 5 Ĉar tie staris tronoj de juĝo, Tronoj
de la domo de David. 6 Deziru pacon al Jerusalem;
Bonan staton havu viaj amantoj. 7 Paco estu inter viaj
muroj, Bonstato en viaj palacoj. 8 Pro miaj fratoj kaj
amikoj mi do diru: Paco estu al vi. 9 Pro la domo de la
Eternulo, nia Dio, Mi deziras al vi bonon.

**123** Kanto de suprenirado. Al Vi mi levas miajn
okulojn, Ho Vi, kiu sidas en la ĉielo! 2 Jen kiel
la okuloj de sklavoj estas direktitaj al la mano de
iliaj sinjoroj, Kiel la okuloj de sklavino al la mano
de ŝia sinjorino, Tiel niaj okuloj estas direktitaj al la
Eternulo, nia Dio, Ĝis Li korfavoros nin. 3 Korfavoru
nin, ho Eternulo, korfavoru nin; Ĉar ni suferis sufiĉe da
malestimo. 4 Tute pleniĝis nia animo De la insultado
de arogantuloj, De la malhonorado de fieruloj.

**124** Kanto de suprenirado. De David. Se la Eternulo
ne estus kun ni, Diru nun Izrael, 2 Se la
Eternulo ne estus kun ni, Kiam homoj leviĝis kontraŭ
ni: 3 Tiam ili englutus nin vivajn, Kiam ekflamis
kontraŭ ni ilia kolero; 4 Tiam dronigus nin akvo,
torento kovrus nian animon; 5 Tiam kovrus nian
animon pereiga akvo. 6 Benata estu la Eternulo, Kiu
ne fordonis nin kiel rabakiron al iliaj dentoj. 7 Nia
animo liberiĝis, kiel birdo el la reto de kaptistoj; La

reto disŝiriĝis, kaj ni liberiĝis. 8 Nia helpo estas en la
nomo de la Eternulo, Kiu kreis la ĉielon kaj la teron.

125 Kanto de suprenirado. Kiuj fidas la Eternulon,
Tiuj estas kiel la monto Cion, Kiu ne ŝanceliĝas,
sed restas eterne. 2 Montoj estas ĉirkaŭ Jerusalem,
Kaj la Eternulo ĉirkaŭas Sian popolon, De nun kaj
eterne. 3 Ĉar ne kuŝos la sceptro de malvirteco sur la
sorto de la virtuloj; Por ke la virtuloj ne etendu siajn
manojn al maljustaĵo. 4 Bonfaru, ho Eternulo, al tiuj,
Kiuj estas bonaj kaj piaj per sia koro; 5 Sed tiujn, kiuj
dekliniĝas al siaj malrektaj vojoj, La Eternulo pereigos
kune kun la malbonaguloj. Paco al Izrael!

126 Kanto de suprenirado. Kiam la Eternulo
revenigis la forkaptitojn al Cion, Tiam ni estis
kiel sonĝantoj. 2 Tiam nia buŝo estis plena de gajeco,
Kaj nia lango plena de kantado; Tiam oni diris inter la
popoloj: Ion grandan la Eternulo faris por ĉi tiuj. 3 Ion
grandan la Eternulo faris por ni: Ni ĝojas. 4 Revenigu,
ho Eternulo, niajn forkaptitojn, Kiel riveretojn en
sudan landon. 5 Kiuj semas kun larmoj, Tiuj rikoltos
kun kanto. 6 Iras kaj ploras la portanto de semotaĵo;
Venos kun kanto la portanto de siaj garboj.

127 Kanto de suprenirado. De Salomono. Se la
Eternulo ne konstruas la domon, Tiam vane
laboras super ĝi ĝiaj konstruantoj; Se la Eternulo ne
gardas urbon, Tiam vane maldormas la gardanto. 2
Vane vi frue leviĝas, malfrue sidas, Manĝas panon
kun klopodoj: Al Sia amato Li donas en dormo. 3
Jen, heredo de la Eternulo estas infanoj; Rekompenco
estas la frukto de ventro. 4 Kiel sagoj en la mano de
fortulo, Tiel estas junaj filoj. 5 Bone estas al la homo,
kiu plenigis per ili sian sagujon; Ili ne estos hontigitaj,
Kiam ili parolos kun la malamikoj ĉe la pordego.

128 Kanto de suprenirado. Feliĉa estas tiu, kiu
timas la Eternulon Kaj iras laŭ Liaj vojoj. 2
Kiam vi manĝas la laborakiron de viaj manoj, Feliĉe
kaj bone estas al vi. 3 Via edzino estas kiel fruktoporta
vinberbranĉo interne en via domo; Viaj filoj estas
kiel olivaj branĉoj ĉirkaŭ via tablo. 4 Jen tiel estas
benata tiu homo, Kiu timas la Eternulon. 5 Benos
vin la Eternulo el Cion, Kaj vi vidos la bonstaton de
Jerusalem en la daŭro de via tuta vivo. 6 Kaj vi vidos
la infanojn de viaj infanoj. Paco al Izrael!

129 Kanto de suprenirado. Multe oni afliktis min
de post mia juneco, Diras Izrael, 2 Multe oni
afliktis min de post mia juneco, Sed oni min ne
pereigis. 3 Sur mia dorso plugis plugistoj, Faris siajn
sulkojn longaj. 4 La Eternulo estas justa; Li dishakis
la ŝnurojn de la malvirtuloj. 5 Hontiĝu kaj turniĝu
malantaŭen Ĉiuj malamantoj de Cion. 6 Ili estu kiel
tegmenta herbo, Kiu forvelkas, antaŭ ol oni ĝin elŝiris;
7 Per kiu ne plenigas rikoltanto sian manon Nek
garbiganto sian baskon. 8 Kaj la preterirantoj ne diros:
Beno de la Eternulo estu al vi, Ni benas vin per la
nomo de la Eternulo.

130 Kanto de suprenirado. El profundo mi vokas
Vin, ho Eternulo. 2 Mia Sinjoro, aŭskultu mian
voĉon; Viaj oreloj atentu la voĉon de mia petego. 3 Se
vi, ho Eternulo, kalkulus la pekojn, Kiu povus stari, ho
mia Sinjoro? 4 Sed Vi estas pardonema, Por ke Vi estu
respektata. 5 Mi esperis al la Eternulo, esperis mia
animo, Kaj Lian vorton mi fidis. 6 Mia animo atendas
mian Sinjoron pli, Ol la gardantoj atendas la matenon,
La gardantoj la matenon. 7 Izrael fidu la Eternulon;
Ĉar ĉe la Eternulo estas favorkoreco Kaj ĉe Li estas
granda liberigo. 8 Kaj Li liberigos Izraelon De ĉiuj liaj
pekoj.

131 Kanto de suprenirado. De David. Ho Eternulo,
ne tenas sin alte mia koro, kaj ne leviĝas alte
miaj okuloj; Kaj mi ne okupas min per aferoj grandaj
kaj neatingeblaj por mi. 2 Mi trankviligis kaj kvietigis
mian animon; Kiel infano formetita for de la mamo
de sia patrino, kiel infano demamigita, Tiel estas en
mi mia animo. 3 Ho Izrael, fidu la Eternulon, De nun
kaj eterne.

132 Kanto de suprenirado. Rememoru, ho Eternulo,
Davidon kaj ĉiujn liajn suferojn; 2 Ke li ĵuris
al la Eternulo, Kaj donis sanktan promeson al la
Potenculo de Jakob: 3 Mi ne eniros en la ŝirmejon de
mia domo, Mi ne supreniros sur la liton, pretigitan
por mi; 4 Mi ne donos dormon al miaj okuloj, Nek
dormeton al miaj palpebroj, 5 Ĝis mi trovos lokon por
la Eternulo, Loĝejon por la Potenculo de Jakob. 6 Jen
ni aŭdis, ke ĝi estas en Efrata; Ni ĝin trovis sur arbara
kampo. 7 Ni iru en Lian loĝejon, Ni kliniĝu antaŭ
la benketo de Liaj piedoj. 8 Leviĝu, ho Eternulo, en
Vian ripozejon, Vi kaj la kesto de Via potenco. 9 Viaj
pastroj vestiĝu per justeco, Kaj Viaj fideluloj triumfu.
10 Pro David, Via sklavo, Ne forturnu la vizaĝon de Via
sanktoleito. 11 La Eternulo ĵuris al David veron, kaj Li

ne dekliniĝos de ĝi: Frukton de via ventro Mi sidigos
sur via trono; 12 Se viaj filoj observos Mian interligon
kaj Mian leĝon, kiun Mi instruos al ili, Tiam ankaŭ
iliaj filoj eterne sidos sur via trono. 13 Ĉar la Eternulo
elektis Cionon, Kaj deziris, ke ĝi estu loĝejo por Li: 14
Ĉi tio estas Mia ripozejo por eterne; Ĉi tie Mi loĝos,
ĉar ĝin Mi ekdeziris. 15 Ĝian nutraĵon Mi abunde
benos, Ĝiajn malriĉulojn Mi satigos per pano. 16 Kaj
ĝiajn pastrojn Mi vestos per savo; Kaj ĝiaj fideluloj
ĝojos kaj triumfos. 17 Tie Mi elkreskigos kornon al
David, Tie Mi aranĝos lumilon por Mia sanktoleito.
18 Liajn malamikojn Mi kovros per honto; Sed sur li
brilos lia krono.

**133** Kanto de suprenirado. De David. Jen, kiel bone
kaj ĉarme estas, Se fratoj vivas kune! 2 Kiel
la bona oleo, Kiu de la kapo defluas sur la barbon,
la barbon de Aaron, Kaj defluas sur la randon de lia
vesto; 3 Kiel la roso, Kiu de Ĥermon malleviĝas sur la
montojn de Cion; Ĉar tie la Eternulo donas la benon,
Vivon por eterne.

**134** Kanto de suprenirado. Nun benu la Eternulon,
ĉiuj sklavoj de la Eternulo, Kiuj en la noktoj
staras en la domo de la Eternulo. 2 Levu la manojn al
la sanktejo, Kaj benu la Eternulon. 3 El Cion benu vin
la Eternulo, La Kreinto de la ĉielo kaj la tero.

**135** Haleluja! Gloru la nomon de la Eternulo, Gloru,
sklavoj de la Eternulo, 2 Kiuj staras en la
domo de la Eternulo, En la kortoj de la domo de
nia Dio. 3 Gloru la Eternulon, ĉar la Eternulo estas
bona; Prikantu Lian nomon, ĉar ĝi estas ĉarma. 4
Ĉar Jakobon la Eternulo elektis al Si, Izraelon kiel
Sian trezoron. 5 Ĉar mi scias, ke la Eternulo estas
granda Kaj ke nia Sinjoro estas super ĉiuj dioj. 6 Ĉion,
kion la Eternulo deziras, Li faras, En la ĉielo kaj sur la
tero, sur la maroj kaj en ĉiuj abismoj. 7 Li levas la
nubojn de la randoj de la tero, Li aperigas fulmojn
en la pluvo, Li eligas la venton el Siaj provizejoj. 8
Li batis la unuenaskitojn en Egiptujo, De homo ĝis
bruto. 9 Li aperigis signojn kaj miraklojn interne de
vi, ho Egiptujo, Super Faraono kaj ĉiuj liaj sklavoj.
10 Li batis multajn popolojn, Kaj mortigis potencajn
reĝojn: 11 Siĥonon, reĝon de la Amoridoj, Kaj Ogon,
reĝon de Baŝan, Kaj ĉiujn regnojn Kanaanajn. 12 Kaj Li
donis ilian landon kiel heredon, Heredon al Lia popolo
Izrael. 13 Ho Eternulo, Via nomo estas eterna; Ho
Eternulo, la memoro pri Vi restas por ĉiuj generacioj.
14 Ĉar la Eternulo juĝos Sian popolon, Kaj Li korfavoros
Siajn sklavojn. 15 La idoloj de la popoloj estas arĝento
kaj oro, Faritaĵo de homaj manoj. 16 Buŝon ili havas,
sed ne parolas; Okulojn ili havas, sed ne vidas; 17
Orelojn ili havas, sed ne aŭdas; Kaj ne ekzistas spiro
en ilia buŝo. 18 Kiel ili, tiel estos iliaj farantoj, Ĉiuj, kiuj
ilin fidas. 19 Ho domo de Izrael, benu la Eternulon; Ho
domo de Aaron, benu la Eternulon; 20 Ho domo de
Levi, benu la Eternulon; Ho timantoj de la Eternulo,
benu la Eternulon. 21 El Cion estu benata la Eternulo,
Kiu loĝas en Jerusalem. Haleluja!

**136** Gloru la Eternulon, ĉar Li estas bona, Ĉar
eterna estas Lia boneco. 2 Gloru la Dion de la
dioj, Ĉar eterna estas Lia boneco. 3 Gloru la Sinjoron
de la sinjoroj, Ĉar eterna estas Lia boneco. 4 La sola
faranto de grandaj mirakloj, Ĉar eterna estas Lia
boneco; 5 Kiu saĝege kreis la ĉielon, Ĉar eterna estas
Lia boneco; 6 Kiu etendis la teron super la akvo, Ĉar
eterna estas Lia boneco; 7 Kiu kreis grandajn lumojn,
Ĉar eterna estas Lia boneco; 8 La sunon, por regi en
la tago, Ĉar eterna estas Lia boneco; 9 La lunon kaj
la stelojn, por regi en la nokto, Ĉar eterna estas Lia
boneco; 10 Kiu batis Egiptujon en ĝiaj unuenaskitoj,
Ĉar eterna estas Lia boneco; 11 Kaj elkondukis el ĝia
mezo Izraelon, Ĉar eterna estas Lia boneco; 12 Per
forta mano kaj etendita brako, Ĉar eterna estas Lia
boneco; 13 Kiu fendis la Ruĝan Maron en du partojn,
Ĉar eterna estas Lia boneco; 14 Kaj trairigis Izraelon
tra ĝi, Ĉar eterna estas Lia boneco; 15 Kaj enĵetis
Faraonon kaj lian militistaron en la Ruĝan Maron, Ĉar
eterna estas Lia boneco; 16 Kiu kondukis Sian popolon
tra la dezerto, Ĉar eterna estas Lia boneco; 17 Kiu
batis grandajn reĝojn, Ĉar eterna estas Lia boneco; 18
Kaj mortigis reĝojn potencajn, Ĉar eterna estas Lia
boneco; 19 Siĥonon, reĝon de la Amoridoj, Ĉar eterna
estas Lia boneco; 20 Kaj Ogon, reĝon de Baŝan, Ĉar
eterna estas Lia boneco; 21 Kaj donis ilian landon kiel
heredon, Ĉar eterna estas Lia boneco; 22 Heredon
al Lia sklavo Izrael, Ĉar eterna estas Lia boneco; 23
Kiu rememoris nin, kiam ni estis humiligitaj, Ĉar
eterna estas Lia boneco; 24 Kaj liberigis nin de niaj
premantoj, Ĉar eterna estas Lia boneco; 25 Kiu donas
panon al ĉiu karno, Ĉar eterna estas Lia boneco. 26
Gloru la Dion de la ĉielo, Ĉar eterna estas Lia boneco.

**137** Apud la riveroj de Babel Ni sidis kaj ploris,
Rememorante Cionon. 2 Sur la salikoj tie Ni
pendigis niajn harpojn. 3 Ĉar tie niaj kaptintoj postulis
de ni kantojn, Kaj niaj mokantoj ĝojon, dirante: Kantu
al ni el la kantoj de Cion. 4 Kiel ni kantos sur fremda
tero La kanton de la Eternulo? 5 Se mi forgesos vin,
ho Jerusalem, Tiam forgesiĝu mia dekstra mano;
6 Algluiĝu mia lango al mia palato, Se mi vin ne
memoros, Se mi ne levos Jerusalemon en la supron de
miaj ĝojoj. 7 Rememorigu, ho Eternulo, al la filoj de
Edom La tagon de Jerusalem, kiam ili diris: Detruu,
detruu ĝis ĝia fundamento. 8 Ho ruinigema filino de
Babel! Bone estos al tiu, Kiu repagos al vi por la faro,
kiun vi faris al ni. 9 Bone estos al tiu, Kiu prenos kaj
frakasos viajn infanetojn sur ŝtono.

**138** De David. Mi gloras Vin el mia tuta koro; Antaŭ
la dioj mi Vin prikantas. 2 Mi kliniĝas antaŭ
Via sankta templo, Kaj mi gloras Vian nomon por Via
boneco kaj vereco; Ĉar Vi grandigis pli ol ĉio Vian
nomon per Via vorto. 3 En la tago, kiam mi vokis, Vi
aŭskultis min, Vi donis forton al mia animo. 4 Gloros
Vin, ho Eternulo, ĉiuj reĝoj de la tero, Ĉar ili aŭdis la
vortojn de Via buŝo. 5 Kaj ili prikantos la vojojn de la
Eternulo; Ĉar granda estas la gloro de la Eternulo. 6
Ĉar kvankam la Eternulo estas alte, tamen Li rigardas
humilulon, Kaj fierulon Li rimarkas de malproksime. 7
Kvankam mi iras meze de suferoj, tamen Vi konservas
mian vivon; Kontraŭ la kolero de miaj malamikoj
Vi etendas Vian brakon, Kaj Via dekstra mano min
helpas. 8 La Eternulo plenumos por mi. Ho Eternulo,
Via boneco estas eterna; La kreitaĵojn de Viaj manoj
ne forlasu.

**139** Al la ĥorestro. Psalmo de David. Ho Eternulo,
Vi min esploras kaj min konas. 2 Vi scias, kiam
mi sidas kaj kiam mi leviĝas; Vi komprenas mian
penson de malproksime. 3 Kiam mi iras kaj kiam mi
ripozas, Vi estas ĉirkaŭ mi, Kaj ĉiujn miajn vojojn Vi
konas. 4 Ĉar antaŭ ol troviĝas vorto sur mia lango,
Jen, ho Eternulo, Vi ĉion jam scias. 5 De malantaŭe
kaj de antaŭe Vi ĉirkaŭbaris min Kaj metis sur min
Vian manon. 6 Mirinda estas por mi tia sciado, tro
alta; Mi ĝin ne povas kompreni. 7 Kien mi iros for de
Via spirito? Kaj kien mi kuros for de Via vizaĝo? 8 Se
mi leviĝos al la ĉielo, Vi estas tie; Se mi kuŝiĝos en
Ŝeol, jen Vi tie estas. (Sheol h7585) 9 Ĉu mi okupos la
flugilojn de la matenruĝo, Ĉu mi loĝiĝos sur la rando
de la maro: 10 Ankaŭ tie Via mano min kondukos, Kaj
Via dekstra mano min tenos. 11 Se mi diros: Mallumo
min kovros, Kaj la lumo ĉirkaŭ mi fariĝos nokto: 12 Eĉ
mallumo ne mallumas antaŭ Vi, Kaj la nokto lumas
kiel tago; Mallumo fariĝas kiel lumo. 13 Ĉar Vi kreis
mian internaĵon, Formis min en la ventro de mia
patrino. 14 Mi gloras Vin, ĉar mi estas mirinde kreita;
Mirindaj estas Viaj kreitaĵoj, Kaj mia animo tion bone
konscias. 15 Ne estis kaŝitaj antaŭ Vi miaj ostoj, Kiam
mi estis kreata en kaŝiteco, Kiam mi estis formata en
la profundo de la tero. 16 Mian embrion vidis Viaj
okuloj, Kaj en Via libro estis enskribitaj ĉiuj tagoj
destinitaj, Kiam ankoraŭ eĉ unu ne ekzistis. 17 Kiel
grandvaloraj estas por mi Viaj pensoj, ho Dio! Kiel
granda estas ilia nombro! 18 Se mi ilin kalkulus, ili
estus pli multaj ol la sablo; Kiam mi vekiĝas, mi estas
ankoraŭ kun Vi. 19 Mortigu, ho Dio, la malvirtulojn,
Kaj sangaviduloj foriĝu de mi! 20 Ili parolas pri Vi
malice, Kaj Viaj malamikoj leviĝas por trompo. 21
Viajn malamantojn, ho Eternulo, mi ja malamas, Kaj
Viajn kontraŭulojn mi abomenas. 22 Per ekstrema
malamo mi ilin malamas; Ili fariĝis por mi malamikoj.
23 Esploru min, ho Dio, kaj konu mian koron; Provu
min kaj sciu miajn pensojn. 24 Kaj rigardu, ĉu mi
estas sur malbona vojo, Kaj gvidu min sur la vojo de
eterneco.

**140** Al la ĥorestro. Psalmo de David. Liberigu min,
ho Eternulo, de malbona homo, Gardu min
kontraŭ perfortulo; 2 Kontraŭ tiuj, kiuj elpensas
malbonon en la koro, Ĉiutage kaŭzas militojn; 3 Kiuj
akrigas sian langon, kiel serpento; Veneno de vipuro
estas sub iliaj lipoj. (Sela) 4 Gardu min, ho Eternulo,
kontraŭ la manoj de malvirtuloj, Gardu min kontraŭ
perfortuloj, Kiuj intencas renversi miajn paŝojn. 5
Fieruloj kaŝis kaptilon por mi kaj ŝnurojn, Ili etendis
reton ĉe la vojo, implikilon ili metis por mi. (Sela) 6
Mi diris al la Eternulo: Vi estas mia Dio; Atentu, ho
Eternulo, la voĉon de mia petego. 7 Ho Eternulo, mia
Sinjoro, forto de mia savo, Vi ŝirmas mian kapon en la
tago de batalo. 8 Ne donu, ho Eternulo, al malvirtulo
lian dezirataĵon, Lian intencon ne efektivigu, ke ili
ne fieriĝu. (Sela) 9 La veneno de miaj ĉirkaŭantoj,
La malicaĵo de iliaj lipoj kovru ilin. 10 Falu sur ilin
brulantaj karboj; Ili ĵetiĝu en fajron, En abismojn, ke
ili ne leviĝu. 11 Kalumnianto ne staros forte sur la
tero; Perfortulon la malbono entiros en pereon. 12 Mi

scias, ke la Eternulo defendos la aferon de mizerulo,
La rajton de malriĉuloj. 13 Kaj virtuloj ja gloros Vian
nomon; Piuloj restos antaŭ Via vizaĝo.

**141** Psalmo de David. Ho Eternulo, mi vokas al
Vi; rapidu al mi; Atentu mian voĉon, kiam mi
vokas al Vi. 2 Mia preĝo valoru antaŭ Vi kiel incenso,
La levo de miaj manoj kiel vespera oferdono. 3 Metu,
ho Eternulo, gardon al mia buŝo, Gardu la pordon de
miaj lipoj. 4 Ne klinu mian koron al io malbona, Al
partoprenado en malbonagoj kun malbonaguloj; Mi
ne manĝu iliajn bongustaĵojn. 5 Virtuloj min frapu
favorkore kaj punu min: Ĝi estos oleo por la kapo;
Mia kapo ne rifuzos, se estos eĉ pli; Kaj mi preĝas ĉe
iliaj malfeliĉoj. 6 Disiĝis sur roko iliaj juĝantoj, Kaj
ili aŭdis miajn vortojn, kiel amikaj ili estis. 7 Kiel iu
plugas kaj dispecigas la teron, Tiel estas disĵetitaj iliaj
ostoj ĝis la buŝo de Ŝeol. (Sheol h7585) 8 Ĉar al Vi, ho
Eternulo, mia Sinjoro, estas direktitaj miaj okuloj;
Al Vi mi esperas: ne forpuŝu mian animon. 9 Gardu
min kontraŭ la reto, kiun oni metis al mi, Kontraŭ la
implikilo de la malbonaguloj. 10 La malvirtuloj falu en
siajn retojn ĉiuj, Dum mi preteriros.

**142** Instruo de David, kiam li estis en la kaverno.
Preĝo. Per mia voĉo mi krias al la Eternulo,
Per mia voĉo mi preĝas al la Eternulo. 2 Mi elverŝas
antaŭ Li mian peton, Mian suferon mi al Li rakontas.
3 Kiam senfortiĝis en mi mia spirito, tiam Vi sciis
mian vojon: Sur la vojo, kiun mi iras, ili kaŝis reton
por mi. 4 Rigardu dekstren kaj vidu: neniu volas min
koni; Malaperis rifuĝejo por mi, neniu zorgas pri mia
animo. 5 Mi krias al Vi, ho Eternulo; Mi diras: Vi estas
mia rifuĝejo, Mia parto en la lando de la vivantoj.
6 Atentu mian ploron, ĉar mi tre senfortiĝis; Savu
min de miaj persekutantoj, ĉar ili estas pli fortaj ol
mi. 7 Eligu mian animon el malliberejo, por ke mi
gloru Vian nomon. Min ĉirkaŭos la virtuloj, kiam Vi
bonfaros al mi.

**143** Psalmo de David. Ho Eternulo, aŭskultu mian
preĝon, Atentu mian petegon laŭ Via vereco,
Respondu al mi laŭ Via justeco. 2 Kaj ne eniru en juĝon
kun Via sklavo, Ĉar neniu vivanta povos praviĝi antaŭ
Vi. 3 Ĉar malamiko persekutis mian animon, Premis
al la tero mian vivon; Li metis min en mallumon,
kiel delonge mortintojn. 4 Senfortiĝas en mi mia
animo, Konsumiĝas en mi mia koro. 5 Mi rememoras
la tagojn antikvajn, Mi meditas pri ĉiuj Viaj faroj, Mi
pensas pri la faritaĵoj de Viaj manoj. 6 Mi etendas al
Vi miajn manojn; Mia animo soifas Vin kiel seka tero.
(Sela) 7 Rapidu, aŭskultu min, ho Eternulo, mia spirito
konsumiĝas; Ne kaŝu antaŭ mi Vian vizaĝon, Ĉar mi
similiĝus al la forirantaj en la tombon. 8 Aŭdigu al mi
matene Vian bonecon, Ĉar Vin mi fidas; Montru al mi
la vojon, kiun mi devas iri, Ĉar al Vi mi levas mian
animon. 9 Savu min de miaj malamikoj, ho Eternulo;
Al Vi mi rifuĝas. 10 Instruu al mi plenumi Vian volon,
ĉar Vi estas mia Dio; Via bona spirito gvidu min sur
ebena tero. 11 Pro Via nomo, ho Eternulo, lasu min
vivi; Pro Via justeco eligu mian animon el mizero. 12
Kaj pro Via favorkoreco ekstermu miajn malamikojn
Kaj pereigu ĉiujn premantojn de mia animo, Ĉar mi
estas Via sklavo.

**144** De David. Benata estu la Eternulo, mia Roko, Kiu
instruas miajn manojn batali, miajn fingrojn
militi: 2 Mia bono kaj mia fortikaĵo, Mia rifuĝejo
kaj mia savanto, Mia ŝildo, Li, kiun mi fidas, Kiu
submetas al mi mian popolon. 3 Ho Eternulo, kio
estas homo, ke Vi lin konas, Kaj homido, ke Vi lin
atentas? 4 Homo estas simila al spireto; Liaj tagoj
estas kiel pasanta ombro. 5 Ho Eternulo, klinu Vian
ĉielon kaj iru malsupren; Tuŝu la montojn, kaj ili
ekfumiĝos. 6 Ekbriligu fulmon, kaj dispelu ilin; Sendu
Viajn sagojn, kaj konfuzu ilin. 7 Etendu Vian manon
el supre; Liberigu min, kaj savu min el granda akvo, El
la mano de fremduloj, 8 Kies buŝo parolas malveraĵon
Kaj kies dekstra mano estas mano de trompo. 9 Ho
Dio, novan kanton mi kantos al Vi, Sur dekkorda
psaltero mi muzikos al Vi, 10 Kiu donas helpon al la
reĝoj, Kiu savas Sian sklavon David de danĝera glavo.
11 Liberigu min, kaj savu min el la mano de fremduloj,
Kies buŝo parolas malveraĵon Kaj kies dekstra mano
estas mano de trompo. 12 Niaj filoj kiel plantitaĵoj
kreskas en sia juneco; Niaj filinoj estas kiel skulptitaj
kolonoj, ornamoj de palaco; 13 Niaj grenejoj estas
plenaj, enhavas sufiĉe da greno de ĉiu speco; Niaj
ŝafoj estas en la nombro de miloj kaj dekmiloj sur
niaj paŝtejoj; 14 Niaj bovoj estas ŝarĝitaj; Ne ekzistas
difekto, ne ekzistas perdo, ne ekzistas ploro sur niaj
stratoj; 15 Feliĉa estas la popolo, kiu havas tian staton;
Feliĉa estas la popolo, kies Dio estas la Eternulo.

**145** Glorkanto de David. Mi altigos Vin, mia Dio,
ho Reĝo, Kaj mi benos Vian nomon ĉiam

kaj eterne. 2 Ĉiutage mi Vin benos, Kaj mi gloros
Vian nomon ĉiam kaj eterne. 3 Granda estas la
Eternulo kaj tre glorinda, Kaj Lia grandeco estas
nemezurebla. 4 Generacio al generacio laŭdos Viajn
farojn Kaj rakontos pri Via potenco. 5 Pri la majesto
de Via granda gloro Kaj pri Viaj mirindaj faroj mi
meditos. 6 La forton de Viaj timindaĵoj oni priparolos,
Kaj Vian grandecon mi rakontos. 7 Oni gloros la
renomon de Via granda boneco, Kaj oni prikantos
Vian justecon. 8 Kompatema kaj favorkora estas la
Eternulo, Longetolera kaj kun granda boneco. 9 La
Eternulo estas bona por ĉiuj; Lia favorkoreco estas
super ĉiuj Liaj kreitaĵoj. 10 Gloros Vin, ho Eternulo,
ĉiuj Viaj kreitaĵoj, Kaj Viaj fideluloj Vin benos. 11 Ili
raportos pri la gloro de Via regno Kaj parolos pri Via
potenco, 12 Por sciigi al la homidoj Lian potencon
Kaj la majestan gloron de Lia regno. 13 Via reĝeco
estas reĝeco eterna, Kaj Via regado estas por ĉiuj
generacioj. 14 La Eternulo subtenas ĉiujn falantojn
Kaj restarigas ĉiujn kurbigitojn. 15 Ĉies okuloj estas
turnitaj al Vi, Kaj Vi donas al ili ilian manĝon en
ĝia tempo. 16 Vi malfermas Vian manon Kaj satigas
favore ĉion vivantan. 17 Justa estas la Eternulo en
ĉiuj Siaj vojoj Kaj bona en ĉiuj Siaj faroj. 18 Proksima
estas la Eternulo por ĉiuj, kiuj Lin vokas, Por ĉiuj, kiuj
vokas Lin sincere. 19 La deziron de Siaj respektantoj
Li plenumas, Kaj ilian krion Li aŭdas kaj helpas ilin.
20 La Eternulo gardas ĉiujn Sian amantojn, Kaj ĉiujn
malvirtulojn Li ekstermas. 21 La gloron de la Eternulo
eldiros mia buŝo, Kaj ĉiu karno benu Lian sanktan
nomon ĉiam kaj eterne.

**146** Haleluja! Gloru, ho mia animo, la Eternulon.
2 Mi gloros la Eternulon en la daŭro de mia
tuta vivo, Mi kantos al mia Dio tiel longe, kiel mi
estos. 3 Ne fidu eminentulojn, Homidon, kiu ne povas
helpi. 4 Eliras lia spirito, li reiras en sian teron; Kaj
en tiu tago neniiĝas ĉiuj liaj intencoj. 5 Bone estas
al tiu, kies helpo estas la Dio de Jakob, Kiu esperas
al la Eternulo, lia Dio, 6 Kiu kreis la ĉielon kaj la
teron, La maron, kaj ĉion, kio estas en ili, Kiu gardas
la veron eterne; 7 Kiu faras justecon al la prematoj,
Donas panon al la malsataj. La Eternulo liberigas la
malliberulojn; 8 La Eternulo malfermas la okulojn al
la blinduloj; La Eternulo restarigas la kurbigitojn; La
Eternulo amas la virtulojn; 9 La Eternulo gardas la
enmigrintojn, Subtenas orfon kaj vidvinon; Sed la
vojon de malvirtuloj Li pereigas. 10 La Eternulo reĝas
eterne, Via Dio, ho Cion, por ĉiuj generacioj. Haleluja!

**147** Haleluja! Ĉar estas bone kanti al nia Dio, Ĉar
agrabla estas la glorkantado. 2 La Eternulo
konstruas Jerusalemon, La elpelitojn de Izrael Li
kolektas. 3 Li sanigas la korprematojn Kaj bandaĝas
iliajn vundojn. 4 Li kalkulas la stelojn, Kaj al ili ĉiuj Li
donas nomojn. 5 Granda estas nia Sinjoro kaj tre forta;
Lia saĝo estas nemezurebla. 6 La Eternulo altigas la
humilulojn; Sed la malvirtulojn Li malaltigas ĝis la
tero. 7 Kantu al la Eternulo gloradon, Muziku al nia
Dio per harpo. 8 Li kovras la ĉielon per nuboj, Pretigas
por la tero pluvon, Kreskigas sur la montoj herbon. 9
Li donas al la bruto ĝian nutraĵon, Kaj al la korvidoj,
kiuj krias. 10 Ne la forton de ĉevalo Li ŝatas; Ne la
femuroj de homo al Li plaĉas: 11 Plaĉas al la Eternulo
Liaj timantoj, Kiuj fidas Lian bonecon. 12 Laŭdu, ho
Jerusalem, la Eternulon; Gloru vian Dion, ho Cion. 13
Ĉar Li fortikigis la riglilojn en viaj pordegoj, Li benis
viajn filojn interne de vi. 14 Li donas pacon al viaj
limoj, Li satigas vin per la plej bona el la tritiko. 15 Li
sendas Sian ordonon al la tero; Tre rapide kuras Lia
vorto. 16 Li donas neĝon kiel lanon, Li ŝutas prujnon
kiel cindron. 17 Li ĵetas Sian glacion kiel pecojn; Kiu
kontraŭstaros al Lia frosto? 18 Li sendas Sian vorton,
kaj ĉio degelas; Li blovas per Sia vento, kaj ekfluas
akvo. 19 Li sciigas al Jakob Sian vorton, Siajn leĝojn
kaj decidojn al Izrael. 20 Tiel Li ne faras al iu alia
popolo; Kaj Liajn decidojn ili ne scias. Haleluja!

**148** Haleluja! Gloru la Eternulon el la ĉielo, Gloru
Lin en la alto. 2 Gloru Lin, ĉiuj Liaj anĝeloj;
Gloru Lin, ĉiuj Liaj militistaroj. 3 Gloru Lin, suno kaj
luno; Gloru Lin, ĉiuj lumaj steloj. 4 Gloru Lin, plej
supraj ĉieloj, Kaj la akvo, kiu estas super la ĉielo. 5 Ili
gloru la nomon de la Eternulo; Ĉar Li ordonis, kaj ili
kreiĝis. 6 Kaj Li starigis ilin por ĉiam, por eterne; Li
donis leĝon, kiun ili ne malobeos. 7 Gloru la Eternulon
el la tero, Marmonstroj kaj ĉiuj abismoj; 8 Fulmo kaj
hajlo, neĝo kaj nebulo, Ventego, kiu plenumas Lian
vorton; 9 Montoj kaj ĉiuj montetoj, Fruktoportaj arboj
kaj ĉiuj cedroj; 10 Bestoj kaj ĉiaj brutoj, Rampaĵoj kaj
flugilaj birdoj; 11 Reĝoj de la tero kaj ĉiuj popoloj,
Princoj kaj ĉiuj juĝantoj sur la tero; 12 Junuloj kaj
junulinoj, Maljunuloj kaj knaboj. 13 Ili gloru la nomon
de la Eternulo, Ĉar sole Lia nomo estas alta, Lia
majesto estas sur la tero kaj en la ĉielo. 14 Kaj Li

altigis la kornon de Sia popolo, La gloron de ĉiuj Liaj
fideluloj, De la filoj de Izrael, Lia plej proksima popolo.
Haleluja!

**149** Haleluja! Kantu al la Eternulo novan kanton,
Lian gloron en la anaro de fideluloj. 2 Izrael
ĝoju pri sia Kreinto, La filoj de Cion ĝoju pri sia Reĝo.
3 Ili gloru Lian nomon en danco, Per tamburino kaj
harpo ili muziku al Li. 4 Ĉar al la Eternulo plaĉas
Lia popolo; Li ornamas humilulojn per savo. 5 La
fideluloj ĝoju en honoro, Kantu ĝoje sur siaj kuŝejoj. 6
Glorado al Dio estas en ilia buŝo, Kaj dutranĉa glavo
en ilia mano, 7 Por fari venĝon super la popoloj,
Punkorektadon super la gentoj; 8 Por malliberigi iliajn
reĝojn per ĉenoj Kaj iliajn eminentulojn per feraj
katenoj; 9 Por fari super ili antaŭdestinitan juĝon. Tio
estas honoro por ĉiuj Liaj fideluloj. Haleluja!

**150** Haleluja! Gloru Dion en Lia sanktejo, Gloru
Lin en la firmaĵo de Lia forto. 2 Gloru Lin por
Liaj potencaj faroj, Gloru Lin laŭ Lia granda majesto.
3 Gloru Lin per sonado de trumpeto, Gloru Lin per
psaltero kaj harpo. 4 Gloru Lin per tamburino kaj
danco, Gloru Lin per kordinstrumentoj kaj fluto. 5
Gloru Lin per laŭtaj cimbaloj, Gloru Lin per tintantaj
cimbaloj. 6 Ĉio spiranta gloru la Eternulon. Haleluja!

# Sentencoj

1 Sentencoj de Salomono, filo de David, reĝo de Izrael:
2 Por scii saĝon kaj moralinstruon; Por kompreni
parolojn de prudento; 3 Por ricevi instruon pri saĝo,
Vero, justo, kaj honesto; 4 Por doni al la malkleruloj
spriton, Al la junulo scion kaj singardemon. 5 Saĝulo
aŭdu kaj plimultigu sian scion, Kaj prudentulo akiros
gvidajn kapablojn, 6 Por kompreni sentencon kaj
retoraĵon, La vortojn de saĝuloj kaj iliajn enigmojn. 7
La timo antaŭ la Eternulo estas la komenco de sciado.
Saĝon kaj instruon malpiuloj malestimas. 8 Aŭskultu,
mia filo, la instruon de via patro, Kaj ne forĵetu la
ordonon de via patrino; 9 Ĉar ili estas bela krono
por via kapo, Kaj ornamo por via kolo. 10 Mia filo, se
pekuloj vin logos, Ne sekvu ilin. 11 Se ili diros: Iru
kun ni, Ni embuskos por mortigi, Ni senkaŭze insidos
senkulpulojn; 12 Kiel Ŝeol ni englutos ilin vivajn, Kaj
la piulojn kiel irantajn en la tombon; (Sheol h7585) 13 Ni
trovos diversajn grandvaloraĵojn, Ni plenigos niajn
domojn per rabaĵo; 14 Vi lotos meze inter ni, Unu
monujo estos por ni ĉiuj: 15 Mia filo, ne iru la vojon
kune kun ili; Gardu vian piedon de ilia vojstreko, 16
Ĉar iliaj piedoj kuras al malbono, Kaj rapidas, por verŝi
sangon. 17 Ĉar vane estas metata reto Antaŭ la okuloj
de ĉiu birdo. 18 Kaj ili embuskas sian propran sangon,
Ili insidas siajn proprajn animojn. 19 Tiaj estas la vojoj
de ĉiu, kiu avidas rabakiron; Ĝi forprenas la vivon
de sia posedanto. 20 La saĝo krias sur la strato; Ĝi
aŭdigas sian voĉon sur la placoj; 21 Ĝi vokas en la ĉefaj
kunvenejoj, ĉe la pordegaj enirejoj; En la urbo ĝi diras
siajn parolojn. 22 Ĝis kiam, ho malkleruloj, vi amos
nescion? Kaj al blasfemantoj plaĉos blasfemado, Kaj
senprudentuloj malamos scion? 23 Returnu vin al mia
predikado; Jen mi eligos al vi mian spiriton, Mi sciigos
al vi miajn vortojn. 24 Ĉar mi vokis, kaj vi rifuzis;
Mi etendis mian manon, kaj neniu atentis; 25 Kaj vi
forĵetis ĉiujn miajn konsilojn, Kaj miajn predikojn vi
ne deziris: 26 Tial ankaŭ mi ridos ĉe via malfeliĉo;
Mi mokos, kiam timo vin atakos. 27 Kiam la timo
atakos vin kiel uragano, Kaj via malfeliĉo venos kiel
ventego, Kiam venos al vi mizero kaj sufero: 28 Tiam
ili min vokos, sed mi ne respondos; Ili min serĉos,
sed min ne trovos. 29 Tial ke ili malamis scion, Kaj
timon antaŭ la Eternulo ili ne deziris havi, 30 Ili ne
deziris miajn konsilojn, Ili malestimis ĉiujn miajn
predikojn: 31 Ili manĝu la fruktojn de sia agado, Kaj
ili satiĝu de siaj pripensoj. 32 Ĉar la kapricoj de la
malsaĝuloj ilin mortigas, Kaj la senzorgeco de la
senorduloj ilin pereigas. 33 Sed kiu min aŭskultas, tiu
loĝos sendanĝere, Kaj estos trankvila, kaj ne timos
malbonon.

2 Mia filo! se vi akceptos miajn parolojn Kaj konservos
ĉe vi miajn ordonojn, 2 Ke via orelo atente aŭskultos
saĝon Kaj vian koron vi inklinigos al komprenado;
3 Se vi vokos la prudenton Kaj direktos vian voĉon
al la saĝo: 4 Se vi serĉos ĝin kiel arĝenton, Serĉegos
kiel trezoron: 5 Tiam vi komprenos la timon antaŭ
la Eternulo, Kaj vi akiros konadon pri Dio. 6 Ĉar
la Eternulo donas saĝon; El Lia buŝo venas scio kaj
kompreno. 7 Li havas helpon por la virtuloj; Li estas
ŝildo por tiuj, kiuj vivas pie. 8 Li gardas la iradon de
la justo, Kaj zorgas pri la vojo de Siaj piuloj. 9 Tiam
vi komprenos veremon kaj juston Kaj pion kaj ĉiun
bonan vojon. 10 Ĉar saĝo venos en vian koron, Kaj
scio estos agrabla por via animo. 11 Bona konscio vin
gvidos, Prudento vin gardos, 12 Por savi vin de la vojo
de malbono, De homo, parolanta kontraŭveraĵon, 13
De tiuj, kiuj forlasas la ĝustan vojon, Por iri la vojojn
de mallumo, 14 Kiuj ĝojas, kiam ili faras malbonon,
Trovas plezuron en la malordo de la malboneco, 15
Kies vojoj estas malrektaj Kaj kies irado deflankiĝis;
16 Por savi vin de fremda virino, De edzino ne via,
kies paroloj estas glataj, 17 Kiu forlasas la amikon de
sia juneco, Kaj forgesas la ligon de sia Dio; 18 Ĉar ŝia
domo kondukas al morto, Kaj ŝiaj paŝoj al la inferuloj;
19 Ĉiuj, kiuj eniras al ŝi, ne revenas, Kaj ne reatingas
la vojon de la vivo; 20 Ke vi iru la vojon de bonuloj,
Kaj sekvu la paŝosignojn de piuloj. 21 Ĉar la piuloj
loĝos sur la tero, Kaj la senpekuloj restos sur ĝi; 22
Sed la malpiuloj estos ekstermitaj de sur la tero, Kaj
la maliculoj estos malaperigitaj de tie.

3 Mia filo! ne forgesu mian instruon, Kaj via koro
konservu miajn ordonojn. 2 Ĉar ili akirigos al vi
longan vivon, Jarojn de vivo kaj paco. 3 Favoro kaj vero
vin ne forlasu; Alligu ilin al via kolo, Skribu ilin sur la
tabeloj de via koro. 4 Kaj vi trovos favoron kaj bonan
opinion Ĉe Dio kaj homoj. 5 Fidu la Eternulon per
via tuta koro, Kaj ne fidu vian prudenton. 6 Konsciu
Lin en ĉiuj viaj vojoj, Kaj Li ĝustigos vian iradon. 7
Ne opiniu vin saĝa; Timu la Eternulon, kaj deturnu
vin de malbono. 8 Ĉi tio estos saniga por via korpo,
Kaj bona nutro por viaj ostoj. 9 Faru honoron al la

Eternulo el via havo Kaj el la unuavenaĵo de ĉiuj viaj
rikoltoj: 10 Tiam viaj grenejoj tute pleniĝos, Kaj viaj
vinpremejoj superbordigos moston. 11 La instruon de
la Eternulo, ho mia filo, ne malŝatu; Kaj ne deturnu
vin, kiam Li faras al vi punon; 12 Ĉar kiun la Eternulo
amas, tiun Li punkorektas, Kiel patro la filon, en kiu li
havas plezuron. 13 Feliĉa estas la homo, kiu trovis
saĝon, Kaj la homo, kiu akiris prudenton; 14 Ĉar estas
pli bone ĝin aĉeti, ol aĉeti arĝenton, Kaj ĝia rikoltaĵo
estas pli bona, ol pura oro. 15 Ĝi estas pli kara, ol
juveloj; Kaj nenio, kion vi povus deziri, povas esti
komparata kun ĝi. 16 Longa vivo estas en ĝia dekstra
mano; Riĉo kaj gloro estas en ĝia maldekstra mano.
17 Ĝiaj vojoj estas vojoj agrablaj, Kaj ĉiuj ĝiaj vojetoj
estas paco. 18 Ĝi estas arbo de vivo por tiuj, kiuj ĝin
ekkaptis; Kaj feliĉaj estas tiuj, kiuj ĝin posedas. 19
La Eternulo per saĝo fondis la teron; Per prudento
Li aranĝis la ĉielon. 20 Per Lia ĉionsciado disiĝis
abismoj; Kaj la nuboj elverŝas roson. 21 Mia filo! ili ne
foriru de viaj okuloj; Konservu klarecon de la kapo
kaj prudenton: 22 Ili estos vivo por via animo, Kaj
ornamo por via kolo. 23 Tiam vi iros sendanĝere vian
vojon, Kaj via piedo ne falpuŝiĝos. 24 Kiam vi kuŝiĝos
dormi, vi ne timos; Kaj kiam vi kuŝos, via dormo estos
agrabla. 25 Ne timu subitan teruron, Nek pereigon,
kiu povus veni de malbonuloj; 26 Ĉar la Eternulo estos
via helpo, Kaj gardos vian piedon kontraŭ reto. 27
Ne rifuzu bonon al la bezonantoj, Se via mano havas
la forton por fari. 28 Kiam vi havas ĉe vi, ne diru al
via proksimulo: Iru kaj revenu, kaj morgaŭ mi donos.
29 Ne pripensu malbonon kontraŭ via proksimulo,
Kiam li kun konfido loĝas ĉe vi. 30 Ne malpacu kun iu
senkaŭze, Se li ne faris al vi malbonon. 31 Ne enviu
rabemulon, Kaj elektu neniun el liaj vojoj; 32 Ĉar la
perversulojn la Eternulo abomenas, Kaj Sian intencon
Li malkaŝas al la piuloj. 33 Malbeno de la Eternulo
estas en la domo de malbonulo, Kaj la loĝejon de
piuloj Li benas. 34 La mokantojn Li mokas, Kaj al
la humiluloj Li donas favoron. 35 Honoron heredas
saĝuloj; Sed malsaĝuloj forportas honton.

**4** Aŭskultu, infanoj, la instruon de la patro, Kaj
atentu, por lerni prudenton; 2 Ĉar bonan instruon
mi donis al vi; Mian leĝon ne forlasu. 3 Ĉar mi estis
filo de mia patro, Dorlotata kaj sola de mia patrino. 4
Kaj li instruis min, kaj diris al mi: Via koro akceptu
miajn vortojn; Observu miajn ordonojn, kaj vi vivos.
5 Akiru saĝon, akiru prudenton; Ne forgesu, kaj ne
deflankiĝu de la paroloj de mia buŝo. 6 Ne forlasu
ĝin, kaj ĝi vin gardos; Amu ĝin, kaj ĝi zorgos pri vi.
7 La komenco de saĝo estas: akiru saĝon; Kaj por
via tuta havo akiru prudenton. 8 Ŝatu ĝin alte, kaj
ĝi vin altigos; Kaj ĝi donos al vi honoron, se vi ĝin
enbrakigos. 9 Ĝi donos ĉarman ornamon al via kapo;
Belan kronon ĝi donacos al vi. 10 Aŭskultu, mia filo,
kaj akceptu miajn vortojn; Kaj multiĝos la jaroj de
via vivo. 11 Mi kondukos vin laŭ la vojo de saĝo; Mi
irigos vin sur rekta vojstreko. 12 Kiam vi iros, via
irado ne estos malfaciligata; Kaj kiam vi kuros, vi ne
falpuŝiĝos. 13 Tenu forte la instruon, ne forlasu ĝin;
Konservu ĝin, ĉar ĝi estas via vivo. 14 La vojstrekon
de malpiuloj ne iru, Kaj ne ekpaŝu sur la vojo de
malbonuloj; 15 Evitu ĝin, ne trapasu ĝin; Flankiĝu de
ĝi, kaj preterpasu. 16 Ĉar ili ne ekdormas, se ili ne faris
malbonon; Kaj ili perdas la dorman ripozon, se ili ne
pekigis; 17 Ĉar ili manĝas panon de malpio Kaj trinkas
vinon de krimo. 18 Kaj la vojo de piuloj estas kiel
lumo leviĝanta, Kiu ĉiam pli lumas ĝis plena tagiĝo.
19 La vojo de malpiuloj estas kiel mallumo; Ili ne scias,
je kio ili falpuŝiĝos. 20 Mia filo, atentu miajn vortojn;
Klinu vian orelon al miaj paroloj. 21 Ili ne foriĝu de
viaj okuloj; Gardu ilin en via koro. 22 Ĉar ili estas vivo
por tiuj, kiuj ilin trovis, Kaj sanigaj por ilia tuta korpo.
23 Pli ol ĉion gardatan, gardu vian koron; Ĉar el ĝi
eliras la vivo. 24 Forigu de vi falsemon de la buŝo,
Kaj malicon de la lipoj malproksimigu de vi. 25 Viaj
okuloj rigardu rekte, Kaj viaj palpebroj direktiĝu rekte
antaŭen. 26 Fortikigu la direkton de viaj piedoj, Kaj
ĉiuj viaj vojoj estu firmaj. 27 Ne ŝanceliĝu dekstren,
nek maldekstren; Forigu de malbono vian piedon.

**5** Mia filo! atentu mian saĝon; Al mia prudento klinu
vian orelon, 2 Por ke vi konservu prudenton Kaj
via buŝo tenu scion. 3 Ĉar la buŝo de malĉastulino
elverŝas mielon, Kaj ŝia gorĝo estas pli glata ol oleo. 4
Sed ŝia sekvaĵo estas maldolĉa kiel absinto, Akra kiel
ambaŭtranĉa glavo. 5 Ŝiaj piedoj iras malsupren al la
morto; Ŝiaj paŝoj atingas Ŝeolon. (Sheol h7585) 6 Ŝi ne iras
rekte laŭ la vojo de vivo; Ŝiaj paŝoj ŝanceliĝas, sed tion
ŝi ne scias. 7 Kaj nun, infanoj, aŭskultu min, Kaj ne
forkliniĝu de la vortoj de mia buŝo. 8 Malproksimigu
de ŝi vian vojon, Kaj ne proksimiĝu al la pordo de ŝia
domo, 9 Por ke vi ne fordonu al aliaj vian honoron
Kaj viajn jarojn al la kruelulo, 10 Por ke fremduloj ne

satiĝu de via havo, Kaj viaj laboroj ne estu en fremda
domo, 11 Ĝis vi ĝemos en la fino, Kiam konsumiĝos
via karno kaj via korpo, 12 Kaj vi diros: Ho, kiel mi
malamis instruon, Kaj mia koro malŝatis moraligon!
13 Kaj mi ne aŭskultis la voĉon de miaj instruantoj,
Kaj mi ne klinis mian orelon al miaj lernigantoj. 14 Mi
estis preskaŭ en ĉia malbono Meze de kunveno kaj
societo. 15 Trinku akvon el via cisterno, Kaj fluantan
el via puto. 16 Viaj fontoj disfluu eksteren, Akvaj
torentoj en la stratojn. 17 Ili apartenu al vi sola, Sed
ne al aliaj kun vi. 18 Via fonto estu benata; Kaj havu
ĝojon de la edzino de via juneco. 19 Ŝi estas ĉarma kiel
cervino, Kaj aminda kiel ibeksino; Ŝiaj karesoj ĝuigu
vin en ĉiu tempo, Ŝia amo ĉiam donu al vi plezuron.
20 Kaj kial, mia filo, vi volas serĉi al vi plezuron ĉe
fremda virino Kaj enbrakigi ne apartenantan al vi? 21
Ĉar antaŭ la okuloj de la Eternulo estas la vojoj de
homo, Kaj ĉiujn liajn irojn Li pripensas. 22 Liaj propraj
malbonfaroj enkaptos la malpiulon, Kaj la ŝnuroj de
lia peko lin tenos. 23 Li mortos pro manko de eduko;
Kaj la multo de lia senprudenteco lin devojigos.

6 Mia filo! se vi garantiis por via proksimulo Kaj
donis vian manon por aliulo, 2 Tiam vi enretiĝis
per la vortoj de via buŝo, Kaptiĝis per la vortoj de
via buŝo. 3 Tiam, mia filo, agu tiel kaj saviĝu, Ĉar
vi falis en la mano de via proksimulo: Iru, vigliĝu,
kaj petegu vian proksimulon; 4 Ne lasu viajn okulojn
dormi Kaj viajn palpebrojn dormeti; 5 Savu vin, kiel
gazelo, el la mano, Kaj kiel birdo el la mano de la
birdokaptisto. 6 Iru al la formiko, vi maldiligentulo;
Rigardu ĝian agadon, kaj saĝiĝu. 7 Kvankam ĝi ne
havas estron, Nek kontrolanton, nek reganton, 8 Ĝi
pretigas en la somero sian panon, Ĝi kolektas dum
la rikolto sian manĝon. 9 Ĝis kiam, maldiligentulo,
vi kuŝos? Kiam vi leviĝos de via dormo? 10 Iom
da dormo, iom da dormeto, Iom da kunmeto de la
manoj por kuŝado; 11 Kaj venos via malriĉeco kiel
rabisto, Kaj via senhaveco kiel viro armita. 12 Homo
sentaŭga, homo malbonfarema, Iras kun buŝo malica,
13 Donas signojn per la okuloj, aludas per siaj piedoj,
Komprenigas per siaj fingroj; 14 Perverseco estas
en lia koro, li intencas malbonon; En ĉiu tempo li
semas malpacon. 15 Tial subite venos lia pereo; Li
estos rompita subite, kaj neniu lin sanigos. 16 Jen
estas ses aferoj, kiujn la Eternulo malamas, Kaj sep,
kiujn Li abomenegas. 17 Arogantaj okuloj, mensogema
lango, Kaj manoj, kiuj verŝas senkulpan sangon, 18
Koro, kiu preparas malbonfarajn intencojn, Piedoj,
kiuj rapidas kuri al malbono, 19 Falsa atestanto, kiu
elspiras mensogojn; Kaj tiu, kiu semas malpacon inter
fratoj. 20 Konservu, mia filo, la ordonon de via patro,
Kaj ne forĵetu la instruon de via patrino. 21 Ligu ilin
por ĉiam al via koro, Volvu ilin sur vian kolon. 22
Kiam vi iros, ili gvidos vin; Kiam vi kuŝiĝos, ili vin
gardos; Kaj kiam vi vekiĝos, ili parolos kun vi. 23 Ĉar
moralordono estas lumingo, kaj instruo estas lumo,
Kaj edifaj predikoj estas vojo de vivo, 24 Por gardi
vin kontraŭ malbona virino, Kontraŭ glata lango de
fremdulino. 25 Ne deziregu en via koro ŝian belecon,
Kaj ne kaptiĝu per ŝiaj palpebroj. 26 Ĉar la kosto de
publikulino estas nur unu pano; Sed fremda edzino
forkaptas la grandvaloran animon. 27 Ĉu iu povas
teni fajron en sia sino tiel, Ke liaj vestoj ne brulu? 28
Ĉu iu povas marŝi sur ardantaj karboj, Ne bruligante
siajn piedojn? 29 Tiel ankaŭ estas kun tiu, kiu venas al
la edzino de sia proksimulo; Neniu, kiu ŝin ektuŝas,
restas sen puno. 30 Oni ne faras grandan honton al
ŝtelanto, Se li ŝtelas por sin satigi, kiam li malsatas;
31 Kaj kiam oni lin kaptas, li pagas sepoble; La tutan
havon de sia domo li fordonas. 32 Sed kiu adultas kun
virino, tiu estas sensaĝa; Tiu, kiu faras tion, pereigas
sian animon; 33 Batojn kaj malhonoron li ricevas, Kaj
lia honto ne elviŝiĝas; 34 Ĉar furiozas la ĵaluzo de la
edzo; Kaj li ne indulgas en la tempo de la venĝo. 35 Li
rigardas nenian kompenson, Kaj li ne akceptas, se vi
volas eĉ multe donaci.

7 Mia filo! konservu miajn vortojn, Kaj gardu
ĉe vi miajn moralordonojn. 2 Konservu miajn
moralordonojn, kaj vivu; Kaj mian instruon, kiel la
pupilon de viaj okuloj. 3 Ligu ilin al viaj fingroj;
Skribu ilin sur la tabelo de via koro. 4 Diru al la saĝo:
Vi estas mia fratino; Kaj la prudenton nomu mia
parencino; 5 Por ke vi estu gardata kontraŭ fremda
edzino, Kontraŭ fremdulino, kies paroloj estas glataj.
6 Ĉar mi rigardis tra fenestro de mia domo, Tra mia
krado; 7 Kaj mi vidis inter la naivuloj, Mi rimarkis
inter la nematuruloj junulon senprudentan, 8 Kiu
pasis sur la placo preter ŝia angulo, Kaj iris la vojon al
ŝia domo, 9 En krepusko, en vespero de tago, Kiam
fariĝis nokto kaj mallumo. 10 Kaj jen renkonte al
li iras virino En ornamo de publikulino, ruzema je
la koro. 11 Bruema kaj vagema; Ŝiaj piedoj ne loĝas

en ŝia domo. 12 Jen ŝi estas sur la strato, jen sur la
placoj, Kaj apud ĉiu angulo ŝi embuskas. 13 Kaj ŝi
kaptis lin, kaj kisis lin Kun senhonta vizaĝo, kaj diris
al li: 14 Mi devis alporti dankan oferdonon; Hodiaŭ mi
plenumis mian solenan promeson. 15 Tial mi eliris al
vi renkonte, Por serĉi vian vizaĝon, kaj mi vin trovis.
16 Mi bele kovris mian liton Per multkoloraj teksaĵoj
el Egiptujo. 17 Mi parfumis mian kuŝejon Per mirho,
aloo, kaj cinamo. 18 Venu, ni ĝuu sufiĉe volupton ĝis
la mateno, Ni plezuriĝu per la amo. 19 Ĉar mia edzo
ne estas hejme, Li iris en malproksiman vojon; 20 La
sakon kun mono li prenis kun si; Li revenos hejmen je
la plenluno. 21 Ŝi forlogis lin per sia multeparolado,
Per sia glata buŝo ŝi lin entiris. 22 Li tuj iras post ŝi,
Kiel bovo iras al la buĉo Kaj kiel katenita malsaĝulo al
la puno; 23 Ĝis sago fendas al li la hepaton; Kiel birdo
rapidas al la kaptilo, Kaj ne scias, ke ĝi pereigas sian
vivon. 24 Kaj nun, infanoj, aŭskultu min, Atentu la
vortojn de mia buŝo. 25 Via koro ne flankiĝu al ŝia
vojo, Ne eraru sur ŝiaj irejo; 26 Ĉar multajn ŝi vundis
kaj faligis, Kaj multegaj estas ŝiaj mortigitoj. 27 Ŝia
domo estas vojoj al Ŝeol, Kiuj kondukas malsupren al
la ĉambroj de la morto. **(Sheol h7585)**

**8** Ĉu ne vokas la saĝo? Kaj ĉu la prudento ne aŭdigas
sian voĉon? 2 Ĝi staras sur la pinto de altaĵoj, Apud
la vojo, ĉe la vojkruĉiĝoj. 3 Apud la pordegoj, ĉe la
eniro en la urbon, Ĉe la eniro tra la pordoj, ĝi kantas:
4 Al vi, ho viroj, mi vokas; Kaj mia voĉo sin turnas al
la homoj: 5 Komprenu, naivuloj, la prudenton, Kaj
sensprituloj prenu en la koron. 6 Aŭskultu, ĉar mi
parolos gravaĵon, Kaj ĝustaĵo eliros el mia buŝo. 7 Ĉar
mia lango parolos veron, Kaj malpiaĵon abomenas
miaj lipoj. 8 Justaj estas ĉiuj paroloj de mia buŝo; Ili ne
enhavas falson kaj malicon. 9 Ĉiuj ili estas ĝustaj por
tiu, kiu ilin komprenas, Kaj justaj por tiuj, kiuj akiris
scion. 10 Prenu mian instruon, kaj ne arĝenton; Kaj la
scion ŝatu pli, ol plej puran oron. 11 Ĉar saĝo estas pli
bona ol multekostaj ŝtonoj; Kaj nenio, kion oni povas
deziri, povas esti egala al ĝi. 12 Mi, saĝo, loĝas kun
la prudento, Kaj mi trovas prudentajn konsilojn. 13
Timo antaŭ la Eternulo malamas malbonon, Fieron,
malhumilon, kaj malbonan vojon; Malsinceran buŝon
mi malamas. 14 De mi venas konsilo kaj bonaranĝo; Mi
estas prudento; al mi apartenas forto. 15 Per mi reĝas
la reĝoj, Kaj la estroj donas leĝojn de justeco. 16 Per mi
regas la princoj Kaj la potenculoj kaj ĉiuj juĝantoj sur
la tero. 17 Mi amas miajn amantojn; Kaj miaj serĉantoj
min trovos. 18 Riĉo kaj gloro estas ĉe mi, Daŭra havo
kaj justo. 19 Mia frukto estas pli bona ol oro kaj ol
plej pura oro; Kaj la rikolto de mi estas pli bona ol
elektita arĝento. 20 Laŭ la vojo de vero mi iras, Laŭ la
vojstreko de la justo; 21 Por heredigi al miaj amantoj
esencan bonon, Kaj plenigi iliajn trezorejojn. 22 La
Eternulo min formis en la komenco de Sia vojo, Antaŭ
Siaj kreitaĵoj, tre antikve. 23 Antaŭ eterno mi estis
firme fondita, en la komenco, Antaŭ la kreo de la tero.
24 Kiam ankoraŭ ne ekzistis la abismoj, mi estis jam
naskita, Kiam ankoraŭ ne ekzistis fontoj, ŝprucigantaj
akvon. 25 Antaŭ ol la montoj estis starigitaj, Antaŭ la
altaĵoj mi estis kreita; 26 Kiam la tero ankoraŭ ne estis
farita, nek la kampoj, Nek la komencaj polveroj de la
mondo. 27 Dum Li firmigis la ĉielojn, mi jam estis tie;
Dum Li desegnis limojn sur la supraĵo de la abismo, 28
Dum Li fortikigis la nubojn supre, Dum Li firmigis la
fontojn de la abismo, 29 Dum Li donis Sian leĝon al la
maro, Por ke la akvoj ne transpaŝu siajn bordojn, Kaj
dum Li difinis la fundamentojn de la tero: 30 Tiam mi
estis ĉe Li kiel konstruanto; Mi estis la ĝojo de ĉiuj
tagoj, Ludante antaŭ Li ĉiutempe. 31 Mi ludas sur
Lia mondo-tero; Kaj mia ĝojo estas inter la homidoj.
32 Kaj nun, infanoj, aŭskultu min; Kaj feliĉaj estos
tiuj, kiuj iras laŭ miaj vojoj. 33 Aŭskultu instruon kaj
saĝiĝu, Kaj ne forĵetu ĝin. 34 Feliĉa estas la homo, kiu
min aŭskultas, Kiu maldormas ĉiutage ĉe miaj pordoj,
Kiu staras garde ĉe la fostoj de miaj pordegoj. 35 Ĉar
kiu min trovis, tiu trovis vivon, Kaj akiros favoron de
la Eternulo. 36 Sed kiu maltrafas min, tiu difektas sian
animon; Ĉiuj, kiuj min malamas, amas la morton.

**9** La saĝo konstruis sian domon, Ĉarpentis ĝiajn sep
kolonojn. 2 Ĝi buĉis sian bruton, verŝis sian vinon,
Kaj pretigis sian tablon. 3 Ĝi sendis siajn servantinojn,
Por anonci sur la pintoj de la altaĵoj de la urbo: 4 Kiu
estas naiva, tiu sin turnu ĉi tien! Al la sensprituló ĝi
diris: 5 Venu, manĝu de mia pano, Kaj trinku el la
vino, kiun mi enverŝis. 6 Forlasu la malsaĝaĵon, kaj
vivu; Kaj iru laŭ la vojo de la prudento. 7 Kiu instruas
blasfemanton, tiu prenas sur sin malhonoron; Kaj
kiu penas ĝustigi malpiulon, tiu estas mokata. 8 Ne
penu ĝustigi blasfemanton, ke li vin ne malamu: Penu
ĝustigi saĝulon, kaj li vin amos. 9 Donu al saĝulo, kaj li
ankoraŭ pli saĝiĝos; Instruu justulon, kaj li lernos pli.
10 La komenco de la saĝo estas timo antaŭ la Eternulo;

Kaj ekkono pri la Sanktulo estas prudento. 11 Ĉar per
mi plimultiĝos viaj tagoj, Kaj aldoniĝos al vi jaroj
da vivo. 12 Se vi saĝiĝis, vi saĝiĝis por vi; Kaj se vi
blasfemas, vi sola suferos. 13 Virino malsaĝa, bruema,
Sensprita, kaj nenion scianta, 14 Sidas ĉe la pordo de
sia domo, Sur seĝo sur altaĵo de la urbo, 15 Por voki la
pasantojn, Kiuj iras sian ĝustan vojon: 16 Kiu estas
naiva, tiu sin turnu ĉi tien! Kaj al la senspritulo ŝi
diris: 17 Akvoj ŝtelitaj estas dolĉaj, Kaj pano kaŝita
estas agrabla. 18 Kaj li ne scias, ke tie estas mortintoj
Kaj ke ŝiaj invititoj estas en la profundoj de Ŝeol. **(Sheol
h7585)**

**10** Sentencoj de Salomono. Saĝa filo estas ĝojo por
sia patro, Kaj filo malsaĝa estas malĝojo por
sia patrino. 2 Maljustaj trezoroj ne donas utilon;
Sed bonfaremo savas de morto. 3 La Eternulo ne
malsatigos animon de piulo; Sed la avidon de malpiulo
Li forpuŝas. 4 Maldiligenta mano malriĉigas; Sed
mano de diligentuloj riĉigas. 5 Kiu kolektas dum
la somero, tiu estas filo saĝa; Sed kiu dormas en la
tempo de rikolto, tiu estas filo hontinda. 6 Beno
estas sur la kapo de piulo; Sed la buŝo de malpiulo
kaŝas krimon. 7 La memoro de piulo estas benata;
Sed la nomo de malpiuloj forputros. 8 Kiu havas
saĝan koron, tiu akceptos moralordonojn; Sed kiu
havas malsaĝan buŝon, tiu renversiĝos. 9 Kiu iras
en senkulpeco, tiu iras sendanĝere; Sed kiu kurbigas
siajn vojojn, tiu estos punita. 10 Kiu grimacas per la
okulo, tiu kaŭzas suferon; Kaj kiu havas malsaĝan
buŝon, tiu renversiĝos. 11 La buŝo de piulo estas
fonto de vivo; Sed la buŝo de malpiulo kaŝas krimon.
12 Malamo kaŭzas malpacon; Sed amo kovras ĉiujn
pekojn. 13 Sur la lipoj de prudentulo troviĝas saĝo;
Sed vergo apartenas al la dorso de sensaĝulo. 14
Saĝuloj konservas la scion; Sed la buŝo de malsaĝulo
estas proksima al la pereo. 15 La havo de riĉulo
estas lia fortika urbo; Sed pereo por la malriĉuloj
estas ilia malriĉo. 16 La laborpago de piulo estas
por la vivo; La enspezoj de malpiulo estas por peko.
17 Kiu konservas la instruon, tiu iras al vivo; Sed
kiu forĵetas atentigon, tiu restas en eraro. 18 Kiu
kaŝas malamon, tiu havas falseman buŝon; Kaj kiu
elirigas kalumnion, tiu estas malsaĝulo. 19 Ĉe multo
da vortoj ne evitebla estas peko; Sed kiu retenas
siajn lipojn, tiu estas saĝa. 20 La lango de piulo estas
plej bonspeca arĝento; La koro de malpiuloj estas
kiel nenio. 21 La lipoj de piulo gvidas multajn; Sed
malsaĝuloj mortas pro manko de saĝo. 22 La beno
de la Eternulo riĉigas, Kaj malĝojon Li ne aldonas
al ĝi. 23 Por malsaĝulo estas ĝojo fari malbonon;
Kaj saĝo, por saĝulo. 24 Kio timigas malpiulon, tio
trafos lin; Kaj kion deziras piuloj, tio estos donita
al ili. 25 Kiel pasanta ventego, tiel malpiulo rapide
malaperas; Sed piulo havas eternan fundamenton. 26
Kiel la vinagro por la dentoj kaj la fumo por la okuloj,
Tiel la maldiligentulo estas por tiuj, kiuj lin sendis. 27
La timo antaŭ la Eternulo multigas la tagojn; Sed la
jaroj de malpiuloj estos mallongigitaj. 28 La atendo
de piuloj fariĝos ĝojo; Sed la espero de malpiuloj
pereos. 29 La vojo de la Eternulo estas defendo por
la senpekulo, Sed pereo por la malbonfarantoj. 30
Piulo neniam falpuŝiĝos; Sed la malpiuloj ne restos
sur la tero. 31 La buŝo de piulo eligas saĝon; Sed lango
falsema estos ekstermita. 32 La lipoj de piulo anoncas
favoraĵon, Kaj la buŝo de malpiuloj malicaĵon.

**11** Malvera pesilo estas abomenaĵo por la Eternulo;
Sed plena pezo plaĉas al Li. 2 Se venis
malhumileco, venos ankaŭ honto; Sed ĉe la humiluloj
estas saĝo. 3 La senkulpeco de la piuloj gvidos ilin;
Sed la falsemo pereigos la maliculojn. 4 Ne helpos
riĉo en la tago de kolero; Sed bonfaremo savas de
morto. 5 La justeco de piulo ebenigas lian vojon; Sed
malpiulo falos per sia malpieco. 6 La justeco de piuloj
savos ilin; Sed la pasio de maliculoj ilin kaptos. 7 Kiam
mortas homo pia, ne pereas lia espero; Sed la atendo
de la pekuloj pereas. 8 Piulo estas savata kontraŭ
mizero, Kaj malpiulo venas sur lian lokon. 9 Per la
buŝo de hipokritulo difektiĝas lia proksimulo; Sed per
kompreno piuloj saviĝas. 10 Kiam al la piuloj estas
bone, la urbo ĝojas; Kaj kiam pereas malpiuloj, ĝi
estas gaja. 11 Per la beno de piuloj urbo altiĝas; Kaj
per la buŝo de malpiuloj ĝi ruiniĝas. 12 Kiu mokas sian
proksimulon, tiu estas malsaĝulo; Sed homo prudenta
silentas. 13 Kiu iras kun kalumnioj, tiu elperfidas
sekreton; Sed kiu havas fidelan spiriton, tiu konservas
aferon. 14 Ĉe manko de prikonsiliĝo popolo pereas; Sed
ĉe multe da konsilantoj estas bonstato. 15 Malbonon
faras al si tiu, kiu garantias por fremdulo; Sed kiu
malamas donadon de mano, tiu estas ekster danĝero.
16 Aminda virino akiras honoron, Kaj potenculoj akiras
riĉon. 17 Bonkora homo donos bonon al sia animo,
Kaj kruelulo detruas sian karnon. 18 Malvirtulo akiras

profiton malveran, Kaj la semanto de virto veran
rekompencon. 19 Bonfarado kondukas al vivo; Kaj kiu
celas malbonon, tiu iras al sia morto. 20 Abomenaĵo
por la Eternulo estas la malickoruloj; Sed plaĉas al
Li tiuj, kiuj iras vojon pian. 21 Oni povas esti certa,
ke malvirtulo ne restos senpuna; Sed la idaro de
virtuloj estos savita. 22 Kiel ora ringo sur la nazo de
porko, Tiel estas virino bela, sed malbonkonduta. 23
La deziro de virtuloj estas nur bono; Sed malvirtuloj
povas esperi nur koleron. 24 Unu disdonas, kaj riĉiĝas
ĉiam pli; Alia tro avaras, kaj tamen nur malriĉiĝas. 25
Animo benanta ĝuos bonstaton; Kaj kiu trinkigas, tiu
mem havos sufiĉe por trinki. 26 Kiu retenas grenon,
tiun malbenas la popolo; Sed beno venas sur la kapon
de tiu, kiu disdonas. 27 Kiu celas bonon, tiu atingos
plaĉon; Sed kiu serĉas malbonon, tiun ĝi trafos. 28 Kiu
fidas sian riĉecon, tiu falos; Sed virtuloj floros kiel
juna folio. 29 Kiu detruas sian domon, tiu heredos
venton; Kaj malsaĝulo estas sklavo de saĝulo. 30 La
frukto de virtulo estas arbo de vivo; Kaj akiranto de
animoj estas saĝulo. 31 Se virtulo ricevas redonon sur
la tero, Tiom pli malvirtulo kaj pekulo!

12 Kiu amas instruon, tiu amas scion; Sed kiu
malamas atentigon, tiu estas malsaĝulo. 2 Bonulo
akiras favoron de la Eternulo; Sed homo malica estos
kondamnita. 3 Ne fortikiĝos homo per malvirto; Sed
la radiko de virtuloj ne ŝanceliĝos. 4 Brava virino
estas krono por sia edzo; Sed senhonora estas kiel
puso en liaj ostoj. 5 La pensoj de virtuloj estas justeco;
La meditado de malvirtuloj estas malico. 6 La paroloj
de malvirtuloj estas insido pri sango; Sed la buŝo
de virtuloj ilin savas. 7 La malvirtuloj renversiĝos
kaj malaperos; Sed la domo de virtuloj staros forte.
8 Oni laŭdas homon laŭ lia saĝo; Sed perversulo
estos hontigita. 9 Pli bona estas homo negrava, sed
laboranta por si, Ol homo, kiu serĉas honoron, sed
al kiu mankas pano. 10 Virtulo kompatas la vivon
de sia bruto; Sed la koro de malvirtuloj estas kruela.
11 Kiu prilaboras sian teron, tiu havos sate da pano;
Sed kiu serĉas vantaĵojn, tiu estas malsaĝulo. 12
Malvirtulo serĉas subtenon de malnobluloj; Sed la
radiko de virtuloj donas forton. 13 Per siaj pekaj vortoj
kaptiĝas malbonulo; Sed virtulo eliras el mizero. 14
Per la fruktoj de sia buŝo homo bone satiĝas; Kaj laŭ
la merito de siaj manoj homo ricevas redonon. 15
La vojo de malsaĝulo estas ĝusta en liaj okuloj; Sed
saĝulo aŭskultas konsilon. 16 Malsaĝulo tuj montras
sian koleron; Sed saĝulo ignoras ofendon. 17 Kiu
estas verama, tiu eldiras tion, kio estas ĝusta, Sed
falsama atestulo trompon. 18 Ofte nepripensita parolo
vundas kiel glavo; Sed la lango de saĝuloj sanigas.
19 Parolo vera restas fortike por ĉiam; Sed parolo
malvera nur por momento. 20 Malico estas en la koro
de malbonintenculoj; Sed ĉe la pacigantoj estas ĝojo.
21 Nenio malbona trafos virtulon; Sed la malvirtuloj
havas plene da malbono. 22 Abomenaĵo por la Eternulo
estas buŝo mensogema; Sed kiuj agas laŭ vero, tiuj
plaĉas al Li. 23 Saĝa homo kaŝas scion; Sed la koro
de malsaĝuloj elkrias malsaĝecon. 24 La mano de
diligentuloj regos; Sed mano maldiligenta pagos
tributon. 25 Zorgo en la koro de homo ĝin premas; Sed
amika vorto ĝin ĝojigas. 26 Al la virtulo estas pli bone,
ol al lia proksimulo; Sed la vojo de malvirtuloj ilin
erarigas. 27 Maldiligenteco ne pretigos al si manĝon;
Sed homo diligenta havas riĉecon. 28 Sur la vojo de
virto estas vivo, Kaj ĝi estos ebenigita kontraŭ morto.

13 Saĝa filo lernas de la patro; Sed mokanto ne
aŭskultas moralinstruon. 2 La frukto de la buŝo
donas al homo bonan manĝon; Sed la deziro de
krimuloj estas perforto. 3 Kiu gardas sian buŝon,
tiu gardas sian animon; Kiu tro malfermas sian
buŝon, tiu pereas. 4 La animo de maldiligentulo
deziras, kaj ne ricevas; Sed la animo de diligentuloj
satiĝas. 5 Vorton malveran virtulo malamas; Sed
malvirtulo agas abomene kaj venas al honto. 6 La virto
gardas tiun, kiu iras ĝustan vojon; Sed la malvirto
pereigas pekulon. 7 Unu ŝajnigas sin riĉa, havante
nenion; Alia ŝajnigas sin malriĉa, havante grandan
riĉecon. 8 Per sia riĉeco homo savas sian animon;
Sed malriĉulo ne aŭskultas atentigon. 9 La lumo
de virtuloj brilegas; Sed la lumilo de malvirtuloj
estingiĝos. 10 Nur de malhumileco venas malpaco;
Sed la akceptantaj konsilojn havas saĝon. 11 Riĉeco
rapide akirita malgrandiĝas; Sed kion oni kolektas per
laboro, tio multiĝas. 12 Espero prokrastata dolorigas
la koron; Sed plenumita deziro estas arbo de vivo.
13 Kiu malŝatas diron, tiu malutilas al si mem; Sed
respektanta ordonon estos rekompencita. 14 Instruo
de saĝulo estas fonto de vivo, Por evitigi la retojn
de la morto. 15 Bona prudento plaĉigas; Sed la vojo
de perfiduloj estas malglata. 16 Ĉiu prudentulo agas
konscie; Sed malsaĝulo elmontras malsaĝecon. 17

Malbona sendito falas en malfeliĉon; Sed sendito fidela
sanigas. 18 Malriĉa kaj hontigata estos tiu, kiu forpuŝas
instruon; Sed kiu observas instruon, tiu estos estimata.
19 Deziro plenumita estas agrabla por la animo; Sed
malagrable por la malsaĝuloj estas deturni sin de
malbono. 20 Kiu iras kun saĝuloj, tiu estos saĝa; Sed
kamarado de malsaĝuloj suferos doloron. 21 Pekulojn
persekutas malbono; Sed virtulojn rekompencas
bono. 22 Bonulo heredigas la nepojn; Kaj por virtulo
konserviĝas la havo de pekulo. 23 Multe da manĝaĵo
estas sur la kampo de malriĉuloj; Sed multaj pereas
pro manko de justeco. 24 Kiu ŝparas sian vergon, tiu
malamas sian filon; Sed kiu lin amas, tiu baldaŭ lin
punas. 25 Virtulo manĝas, por satigi sian animon; Sed
la ventro de malvirtuloj havas mankon.

14 Saĝa virino konstruas sian domon; Sed malsaĝa
detruas ĝin per siaj manoj. 2 Kiu iras la ĝustan
vojon, tiu timas la Eternulon; Sed kiu iras vojon
malĝustan, tiu Lin malestimas. 3 En la buŝo de
malsaĝulo estas vergo por lia malhumileco; Sed la
buŝo de saĝuloj ilin gardas. 4 Se ne ekzistas bovoj,
la grenejoj estas malplenaj; Sed multe da profito
estas de la forto de bovoj. 5 Verama atestanto ne
mensogas; Sed atestanto falsama elspiras mensogojn.
6 Mokanto serĉas saĝecon kaj ĝin ne trovas; Sed
por saĝulo la sciado estas facila. 7 Foriru de homo
malsaĝa; Ĉar vi ne aŭdos parolon de saĝo. 8 La
saĝeco de saĝulo estas komprenado de sia vojo; Kaj
la malsaĝeco de malsaĝuloj estas trompiĝado. 9
Malsaĝuloj ŝercas pri siaj kulpoj; Sed inter virtuloj
ekzistas reciproka favoro. 10 Koro scias sian propran
malĝojon; Kaj en ĝia ĝojo ne partoprenas fremdulo. 11
Domo de malvirtuloj estos ekstermita; Sed dometo de
virtuloj floros. 12 Iufoje vojo ŝajnas ĝusta al homo, Kaj
tamen ĝia fino kondukas al la morto. 13 Ankaŭ dum
ridado povas dolori la koro; Kaj la fino de ĝojo estas
malĝojo. 14 Laŭ siaj agoj manĝos homo malbonkora;
Kaj homo bona satiĝos per siaj faroj. 15 Naivulo
kredas ĉiun vorton; Sed saĝulo estas atenta pri sia
vojo. 16 Saĝulo timas, kaj forkliniĝas de malbono;
Sed malsaĝulo estas incitiĝema kaj memfidema. 17
Malpacienculo faras malsaĝaĵojn; Kaj malbonintenculo
estas malamata. 18 Naivuloj akiras malsaĝecon; Sed
saĝuloj estas kronataj de klereco. 19 Malbonuloj
humiliĝos antaŭ bonuloj; Kaj malvirtuloj estos antaŭ
la pordego de virtulo. 20 Malriĉulo estas malamata eĉ
de sia proksimulo; Sed riĉulo havas multe da amikoj.
21 Kiu malŝatas sian proksimulon, tiu estas pekulo;
Sed kiu kompatas malriĉulojn, tiu estas feliĉa. 22
Ĉu ne eraras malbonintenculoj? Sed favorkoreco kaj
vero estas ĉe tiuj, kiuj havas bonajn intencojn. 23 De
ĉiu laboro estos profito; Sed de babilado venas nur
senhaveco. 24 Propra riĉeco estas krono por la saĝuloj;
Sed la malsaĝeco de la malsaĝuloj restas malsaĝeco. 25
Verparola atestanto savas animojn; Sed malverparola
elspiras trompon. 26 En la timo antaŭ la Eternulo estas
forta fortikaĵo; Kaj Li estos rifuĝejo por Siaj infanoj.
27 La timo antaŭ la Eternulo estas fonto de vivo, Por
evitigi la retojn de la morto. 28 Grandeco de popolo
estas gloro por reĝo; Kaj manko de popolo pereigas
la reganton. 29 Pacienculo havas multe da saĝo; Sed
malpacienculo elmontras malsaĝecon. 30 Trankvila
koro estas vivo por la korpo; Sed envio estas puso
por la ostoj. 31 Kiu premas malriĉulon, tiu ofendas
lian Kreinton; Kaj kiu Lin honoras, tiu kompatas
malriĉulon. 32 Pro sia malboneco malvirtulo estos
forpuŝita; Sed virtulo eĉ mortante havas esperon. 33
En la koro de saĝulo ripozas saĝo; Kaj kio estas en
malsaĝuloj, tio elmontriĝas. 34 Virto altigas popolon;
Sed peko pereigas gentojn. 35 Favoron de la reĝo havas
sklavo saĝa; Sed kontraŭ malbonkonduta li koleras.

15 Milda respondo kvietigas koleron; Sed malmola
vorto ekscitas koleron. 2 La lango de saĝuloj
bonigas la instruon; Sed la buŝo de malsaĝuloj
elparolas sensencaĵon. 3 Sur ĉiu loko estas la okuloj
de la Eternulo; Ili vidas la malbonulojn kaj bonulojn.
4 Milda lango estas arbo de vivo; Sed malbonparola
rompas la spiriton. 5 Malsaĝulo malŝatas la instruon
de sia patro; Sed kiu plenumas la admonon, tiu estas
prudenta. 6 En la domo de virtulo estas multe da
trezoroj; Sed en la profito de malvirtulo estas pereo.
7 La buŝo de saĝuloj semas instruon; Sed la koro de
malsaĝuloj ne estas tia. 8 Oferdono de malvirtuloj
estas abomenaĵo por la Eternulo; Sed la preĝo de
virtuloj al Li plaĉas. 9 Abomenaĵo por la Eternulo
estas la vojo de malvirtulo; Sed kiu celas virton, tiun
Li amas. 10 Malbona puno atendas tiun, kiu forlasas
la vojon; Kaj la malamanto de admono mortos. 11
Ŝeol kaj la abismo estas antaŭ la Eternulo: Tiom pli
la koroj de la homidoj. **(Sheol h7585)** 12 Mokanto ne
amas tiun, kiu lin admonas; Al saĝuloj li ne iras. 13
Ĝoja koro faras la vizaĝon ĝoja; Sed ĉe ĉagreno de

la koro la spirito estas malgaja. 14 La koro de saĝulo
serĉas instruon; Sed la buŝo de malsaĝuloj nutras
sin per malsaĝeco. 15 Ĉiuj tagoj de malfeliĉulo estas
malbonaj; Sed kontenta koro estas festenado. 16 Pli
bona estas malmulto kun timo antaŭ la Eternulo, Ol
granda trezoro kun maltrankvileco ĉe ĝi. 17 Pli bona
estas manĝo el verdaĵo, sed kun amo, Ol grasa bovo,
sed kun malamo. 18 Kolerema homo kaŭzas malpacon;
Kaj pacienculo kvietigas disputon. 19 La vojo de
maldiligentulo estas kiel dornarbeto; Sed la vojo de
virtuloj estas ebenigita. 20 Saĝa filo ĝojigas la patron;
Sed homo malsaĝa estas malhonoro por sia patrino.
21 Malsaĝeco estas ĝojo por malsaĝulo; Sed homo
prudenta iras ĝustan vojon. 22 Kie ne estas konsilo, tie
la entreprenoj neniiĝas; Sed ĉe multe da konsilantoj
ili restas fortikaj. 23 Plezuro por homo estas en la
respondo de lia buŝo; Kaj kiel bona estas vorto en la
ĝusta tempo! 24 La vojo de la vivo por saĝulo iras
supren, Por ke li evitu Ŝeolon malsupre. **(Sheol h7585)**
25 La domon de fieruloj la Eternulo ruinigas; Sed Li
gardas la limojn de vidvino. 26 Abomenaĵo por la
Eternulo estas la intencoj de malnoblulo; Sed agrablaj
estas la paroloj de puruloj. 27 Profitemulo malĝojigas
sian domon; Sed kiu malamas donacojn, tiu vivos. 28
La koro de virtulo pripensas respondon; Sed la buŝo
de malvirtuloj elfluigas malbonon. 29 La Eternulo
estas malproksima de la malvirtuloj; Sed la preĝon
de la virtuloj Li aŭskultas. 30 Luma okulo ĝojigas la
koron; Bona sciigo fortikigas la ostojn. 31 Orelo, kiu
aŭskultas la instruon de la vivo, Loĝos inter saĝuloj.
32 Kiu forpuŝas admonon, tiu malestimas sian animon;
Sed kiu aŭskultas instruon, tiu akiras saĝon. 33 La
timo antaŭ la Eternulo instruas saĝon, Kaj humileco
troviĝas antaŭ honoro.

**16** Al la homo apartenas la projektoj de la koro;
Sed de la Eternulo venas la vortoj de la lango. 2
Ĉiuj vojoj de la homo estas puraj en liaj okuloj; Sed
la Eternulo esploras la spiritojn. 3 Transdonu al la
Eternulo viajn farojn; Tiam viaj entreprenoj staros
forte. 4 Ĉiu faro de la Eternulo havas sian celon;
Eĉ malvirtulo estas farita por tago de malbono. 5
Ĉiu malhumilulo estas abomenaĵo por la Eternulo;
Kaj li certe ne restos ne punita. 6 Per bono kaj vero
pardoniĝas peko; Kaj per timo antaŭ la Eternulo oni
evitas malbonon. 7 Kiam al la Eternulo plaĉas la vojoj
de homo, Li eĉ liajn malamikojn pacigas kun li. 8
Pli bona estas malmulto, sed kun justeco, Ol granda
profito, sed maljusta. 9 La koro de homo pripensas
sian vojon; Sed la Eternulo direktas lian iradon. 10
Sorĉo estas sur la lipoj de reĝo; Lia buŝo ne peku ĉe la
juĝo. 11 Ĝusta pesilo kaj ĝustaj pesiltasoj estas de la
Eternulo; Ĉiuj pezilŝtonoj en la sako estas Lia faro. 12
Abomenaĵo por reĝoj estas fari maljustaĵon; Ĉar per
justeco staras fortike la trono. 13 Al la reĝoj plaĉas
lipoj veramaj; Kaj ili amas tiun, kiu parolas la veron. 14
Kolero de reĝo estas kuriero de morto; Sed homo saĝa
igas ĝin pardoni. 15 Luma vizaĝo de reĝo estas vivo;
Kaj lia favoro estas kiel nubo kun printempa pluvo. 16
Akiro de saĝeco estas multe pli bona ol oro; Kaj akiro
de prudento estas preferinda ol arĝento. 17 La vojo
de virtuloj evitas malbonon; Kiu gardas sian vojon,
tiu konservas sian animon. 18 Antaŭ la pereo iras
fiereco; Kaj antaŭ la falo iras malhumileco. 19 Pli bone
estas esti humila kun malriĉuloj, Ol dividi akiron kun
fieruloj. 20 Kiu prudente kondukas aferon, tiu trovos
bonon; Kaj kiu fidas la Eternulon, tiu estas feliĉa. 21
Kiu havas prudentan koron, tiu estas nomata saĝulo;
Kaj agrablaj paroloj plivalorigas la instruon. 22 Saĝo
estas fonto de vivo por sia posedanto; Sed la instruo
de malsaĝuloj estas malsaĝeco. 23 La koro de saĝulo
prudentigas lian buŝon, Kaj en lia buŝo plivaloriĝas la
instruo. 24 Agrabla parolo estas freŝa mielo, Dolĉa por
la animo kaj saniga por la ostoj. 25 Iufoje vojo ŝajnas
ĝusta al homo, Kaj tamen ĝia fino kondukas al la
morto. 26 Kiu laboras, tiu laboras por si mem; Ĉar lin
devigas lia buŝo. 27 Malbona homo kaŭzas malbonon;
Kaj sur liaj lipoj estas kvazaŭ brulanta fajro. 28 Malica
homo disvastigas malpacon; Kaj kalumnianto disigas
amikojn. 29 Rabemulo forlogas sian proksimulon Kaj
kondukas lin sur vojo malbona. 30 Kiu faras signojn
per la okuloj, tiu intencas malicon; Kiu faras signojn
per la lipoj, tiu plenumas malbonon. 31 Krono de
gloro estas la grizeco; Sur la vojo de justeco ĝi estas
trovata. 32 Pacienculo estas pli bona ol fortulo; Kaj kiu
regas sian spiriton, tiu estas pli bona ol militakiranto
de urbo. 33 Sur la baskon oni ĵetas loton; Sed ĝia tuta
decido estas de la Eternulo.

**17** Pli bona estas seka peco da pano, sed kun
trankvileco, Ol domo plena de viando, kun
malpaco. 2 Saĝa sklavo regos super filo hontinda, Kaj
dividos heredon kune kun fratoj. 3 Fandujo estas por
arĝento, kaj forno por oro; Sed la korojn esploras la

Eternulo. 4 Malbonfaranto obeas malbonajn buŝojn;
Malveremulo atentas malpian langon. 5 Kiu mokas
malriĉulon, tiu ofendas lian Kreinton; Kiu ĝojas pri
ies malfeliĉo, tiu ne restos sen puno. 6 Nepoj estas
krono por maljunuloj; Kaj gloro por infanoj estas iliaj
gepatroj. 7 Al malsaĝulo ne konvenas alta parolado,
Kaj ankoraŭ malpli al nobelo mensogado. 8 Donaco
estas juvelo en la okuloj de sia mastro; Kien ajn
li sin turnos, li sukcesos. 9 Kiu kovras kulpon, tiu
serĉas amikecon; Sed kiu reparolas pri la afero, tiu
disigas amikojn. 10 Pli efikas riproĉo ĉe saĝulo, Ol
cent batoj ĉe malsaĝulo. 11 Malbonulo serĉas nur
ribelon; Sed terura sendato estos sendita kontraŭ
lin. 12 Pli bone estas renkonti ursinon, al kiu estas
rabitaj ĝiaj infanoj, Ol malsaĝulon kun lia malsaĝeco.
13 Kiu redonas malbonon por bono, El ties domo ne
malaperos malbono. 14 La komenco de malpaco estas
kiel liberigo de akvo; Antaŭ ol ĝi tro vastiĝis, forlasu
la malpacon. 15 Kiu pravigas malvirtulon, kaj kiu
malpravigas virtulon, Ambaŭ estas abomenaĵo por
la Eternulo. 16 Por kio servas mono en la mano de
malsaĝulo? Ĉu por aĉeti saĝon, kiam li prudenton ne
havas? 17 En ĉiu tempo amiko amas, Kaj li fariĝas
frato en mizero. 18 Homo malsaĝa donas manon en
manon, Kaj garantias por sia proksimulo. 19 Kiu amas
malpacon, tiu amas pekon; Kiu tro alte levas sian
pordon, tiu serĉas pereon. 20 Malica koro ne trovos
bonon; Kaj kiu havas neĝustan langon, tiu enfalos
en malfeliĉon. 21 Kiu naskas malsaĝulon, tiu havas
ĉagrenon; Kaj patro de malprudentulo ne havos ĝojon.
22 Ĝoja koro estas saniga; Kaj malĝoja spirito sekigas
la ostojn. 23 Kaŝitajn donacojn akceptas malvirtulo,
Por deklini la vojon de la justeco. 24 Antaŭ la vizaĝo
de prudentulo estas saĝo; Sed la okuloj de malsaĝulo
estas en la fino de la tero. 25 Filo malsaĝa estas
ĉagreno por sia patro, Kaj malĝojo por sia patrino. 26
Ne estas bone suferigi virtulon, Nek bati noblulon,
kiu agas juste. 27 Kiu ŝparas siajn vortojn, tiu estas
prudenta; Kaj trankvilanimulo estas homo saĝa. 28 Eĉ
malsaĝulo, se li silentas, estas rigardata kiel saĝulo;
Kaj kiel prudentulo, se li tenas fermita sian buŝon.

**18** Kiu apartiĝas, tiu serĉas sian volupton Kaj iras
kontraŭ ĉiu saĝa konsilo. 2 Malsaĝulo ne deziras
prudenton, Sed nur malkovri sian koron. 3 Kiam venas
malvirtulo, Venas ankaŭ malestimo kun honto kaj
moko. 4 La vortoj de homa buŝo estas profunda akvo;
La fonto de saĝo estas fluanta rivero. 5 Ne estas bone
favori malvirtulon, Por faligi virtulon ĉe la juĝo. 6 La
lipoj de malsaĝulo kondukas al malpaco, Kaj lia buŝo
venigas batojn. 7 La buŝo de malsaĝulo estas pereo
por li, Kaj liaj lipoj enretigas lian animon. 8 La vortoj
de kalumnianto estas kiel frandaĵoj, Kaj ili penetras
en la profundon de la ventro. 9 Kiu estas senzorga
en sia laborado, Tiu estas frato de pereiganto. 10 La
nomo de la Eternulo estas fortika turo: Tien kuras
virtulo, kaj estas ŝirmata. 11 La havo de riĉulo estas lia
fortika urbo, Kaj kiel alta muro en lia imago. 12 Antaŭ
la pereo la koro de homo fieriĝas, Kaj antaŭ honoro
estas humileco. 13 Kiu respondas, antaŭ ol li aŭdis,
Tiu havas malsaĝon kaj honton. 14 La spirito de homo
nutras lin en lia malsano; Sed spiriton premitan kiu
povas elporti? 15 La koro de saĝulo akiras prudenton,
Kaj la orelo de saĝuloj serĉas scion. 16 Donaco de
homo donas al li vastecon Kaj kondukas lin al la
grandsinjoroj. 17 La unua estas prava en sia proceso;
Sed venas lia proksimulo kaj ĝin klarigas. 18 La loto
ĉesigas disputojn Kaj decidas inter potenculoj. 19
Malpaciĝinta frato estas pli obstina, ol fortikigita
urbo; Kaj disputoj estas kiel rigliloj de turo. 20 De
la fruktoj de la buŝo de homo satiĝas lia ventro; Li
manĝas la produktojn de siaj lipoj. 21 Morto kaj vivo
dependas de la lango; Kaj kiu ĝin amas, tiu manĝos
ĝiajn fruktojn. 22 Kiu trovis edzinon, tiu trovis bonon
Kaj ricevis favoron de la Eternulo. 23 Per petegado
parolas malriĉulo; Kaj riĉulo respondas arogante. 24
Havi multajn amikojn estas embarase; Sed ofte amiko
estas pli sindona ol frato.

**19** Pli bona estas malriĉulo, kiu iras en sia
senkulpeco, Ol homo, kiu estas malicbuŝulo kaj
malsaĝulo. 2 Vivo sen prudento ne estas bona; Kaj
kiu tro rapidas, tiu maltrafas la vojon. 3 Malsaĝeco
de homo erarigas lian vojon, Kaj lia koro koleras la
Eternulon. 4 Riĉeco donas multon da amikoj; Sed
malriĉulo estas forlasata de sia amiko. 5 Falsa atestanto
ne restos sen puno; Kaj kiu elspiras mensogojn, tiu
ne saviĝos. 6 Multaj serĉas favoron de malavarulo;
Kaj ĉiu estas amiko de homo, kiu donas donacojn.
7 Ĉiuj fratoj de malriĉulo lin malamas; Tiom pli
malproksimiĝas de li liaj amikoj! Li havas esperon
pri vortoj, kiuj ne estos plenumitaj. 8 Kiu akiras
prudenton, tiu amas sian animon; Kiu gardas saĝon,
tiu trovas bonon. 9 Falsa atestanto ne restos sen

puno; Kaj kiu elspiras mensogojn, tiu pereos. 10 Al
malsaĝulo ne konvenas agrablaĵo; Ankoraŭ malpli
konvenas al sklavo regi super princoj. 11 Saĝo de
homo faras lin pacienca; Kaj gloro por li estas pardoni
pekon. 12 Kiel kriego de leono estas la kolero de reĝo;
Kaj lia favoro estas kiel roso sur herbo. 13 Pereo por
sia patro estas malsaĝa filo; Kaj malpacema edzino
estas kiel konstanta gutado. 14 Domo kaj havo estas
heredataj post gepatroj; Sed saĝa edzino estas de la
Eternulo. 15 Mallaboremeco enigas en profundan
dormon, Kaj animo maldiligenta suferos malsaton.
16 Kiu konservas moralordonon, tiu konservas sian
animon; Sed kiu ne atentas Lian vojon, tiu mortos.
17 Kiu kompatas malriĉulon, tiu pruntedonas al la
Eternulo, Kaj Tiu redonos al li por lia bonfaro. 18
Punu vian filon, dum ekzistas espero, Sed via koro ne
deziru lian pereon. 19 Koleranto devas esti punata;
Ĉar se vi lin indulgos, li fariĝos ankoraŭ pli kolerema.
20 Aŭskultu konsilon kaj akceptu admonon, Por ke
vi poste estu saĝa. 21 Multaj estas la intencoj en la
koro de homo, Sed la decido de la Eternulo restas
fortike. 22 Ornamo estas por la homo lia bonfaro; Kaj
pli bona estas malriĉulo, ol homo mensogema. 23
Timo antaŭ la Eternulo kondukas al vivo, Al sateco,
kaj al evito de malbono. 24 Mallaboremulo metas
sian manon en la poton, Kaj eĉ al sia buŝo li ĝin
ne relevas. 25 Se vi batos blasfemanton, sensciulo
fariĝos atenta; Se oni punas saĝulon, li komprenas la
instruon. 26 Kiu ruinigas patron kaj forpelas patrinon,
Tiu estas filo hontinda kaj malbeninda. 27 Ĉesu, mia
filo, aŭskulti admonon Kaj tamen dekliniĝi de la vortoj
de la instruo. 28 Fripona atestanto mokas juĝon; Kaj
la buŝo de malvirtuloj englutas maljustaĵon. 29 La
blasfemantojn atendas punoj, Kaj batoj la dorson de
malsaĝuloj.

20 La vino estas blasfemanto, ebriiga trinkaĵo estas
sovaĝa; Kaj kiu delogiĝas per ili, tiu ne estas
prudenta. 2 Minaco de reĝo estas kiel kriego de
leono; Kiu lin kolerigas, tiu pekas kontraŭ sia animo.
3 Estas honoro por homo ĉesigi malpacon; Sed ĉiu
malsaĝulo estas malpacema. 4 En la malvarma tempo
mallaborulo ne plugas; Li petos en aŭtuno, kaj li
nenion ricevos. 5 Intenco en la koro de homo estas
profunda akvo; Sed homo saĝa ĝin elĉerpos. 6 Multaj
homoj proklamas pri sia boneco; Sed kiu trovos
homon fidelan? 7 Virtulo iras en sia senpekeco; Feliĉaj
estas liaj infanoj post li. 8 Reĝo, kiu sidas sur trono de
juĝo, Disventumas per siaj okuloj ĉion malbonan. 9
Kiu povas diri: Mi purigis mian koron, Mi estas libera
de mia peko? 10 Neegalaj peziloj, neegalaj mezuroj,
Ambaŭ estas abomenaĵo por la Eternulo. 11 Eĉ knabon
oni povas ekkoni laŭ liaj faroj, Ĉu estas pura kaj justa
lia konduto. 12 Orelon aŭdantan kaj okulon vidantan:
Ilin ambaŭ kreis la Eternulo. 13 Ne amu dormon,
por ke vi ne malriĉiĝu; Malfermu viajn okulojn, kaj
vi satiĝos de pano. 14 Malbona, malbona, diras la
aĉetanto; Sed kiam li foriris, tiam li fanfaronas. 15
Oni povas havi oron kaj multe da perloj; Sed buŝo
prudenta estas multevalora ilo. 16 Prenu la veston
de tiu, kiu garantiis por aliulo; Kaj pro la fremduloj
prenu de li garantiaĵon. 17 Malhonesta pano estas
bongusta por homo; Sed lia buŝo poste estos plena
de ŝtonetoj. 18 Intencoj fortikiĝas per konsilo; Kaj
militon oni faru prudente. 19 Kiu malkaŝas sekreton,
tiu estas kiel kalumnianto; Ne komunikiĝu kun tiu,
kiu havas larĝan buŝon. 20 Kiu malbenas sian patron
kaj sian patrinon, Ties lumilo estingiĝos meze de
profunda mallumo. 21 Heredo, al kiu oni komence
tro rapidas, Ne estas benata en sia fino. 22 Ne diru:
Mi repagos malbonon; Fidu la Eternulon, kaj Li vin
helpos. 23 Neegalaj peziloj estas abomenaĵo por la
Eternulo, Kaj malvera pesilo estas ne bona. 24 La irado
de homo dependas de la Eternulo; Kiel homo povus
kompreni sian vojon? 25 Ĝi estas reto por homo, se li
rapidas nomi ion sankta Kaj esploras nur post faro
de promeso. 26 Saĝa reĝo dispelas malvirtulojn, Kaj
venigas radon sur ilin. 27 La animo de homo estas
lumilo de la Eternulo; Ĝi esploras ĉiujn internaĵojn de
la korpo. 28 Favorkoreco kaj veremeco hardas reĝon;
Kaj per favorkoreco li subtenas sian tronon. 29 Gloro
por junuloj estas ilia forto, Kaj ornamo por maljunuloj
estas grizeco. 30 Vundoj de batoj devas penetri en
malbonulon, Kaj frapoj devas iri profunde en lian
korpon.

21 Kiel akvaj torentoj estas la koro de reĝo en
la mano de la Eternulo: Kien Li volas, Li ĝin
direktas. 2 Ĉiuj vojoj de homo estas ĝustaj en liaj
okuloj; Sed la Eternulo pesas la korojn. 3 Plenumado
de vero kaj justeco Estas al la Eternulo pli agrabla ol
oferado. 4 Fieraj okuloj kaj aroganta koro, Kulturaĵo de
malvirtuloj, estas peko. 5 La entreprenoj de diligentulo
donas nur profiton; Sed ĉiu trorapidado kondukas nur

al manko. 6 Akirado de trezoroj per lango mensogema
Estas vanta bloveto, retoj de morto. 7 La rabo de
malvirtuloj atakos ilin mem; Ĉar ili ne volis fari
justaĵon. 8 Malrekta estas la vojo de homo kulpa;
Sed la agado de purulo estas ĝusta. 9 Pli bone estas
loĝi sur angulo de tegmento, Ol kun malpacema
edzino en komuna domo. 10 La animo de malvirtulo
deziras malbonon; Lia proksimulo ne estas favorata
de li. 11 Kiam blasfemanto estas punata, senspertulo
fariĝas pli saĝa; Kaj kiam oni instruas saĝulon, li
akiras prudenton. 12 La Justulo rigardas la domon de
malvirtulo, Kaj Li faligas malvirtulojn en malbonon. 13
Se iu ŝtopas sian orelon kontraŭ kriado de malriĉulo,
Li ankaŭ vokos kaj ne estos aŭskultata. 14 Sekreta
donaco kvietigas koleron, Kaj donaco en la sinon,
fortan furiozon. 15 Farado de justaĵo estas ĝojo por
la virtulo Kaj teruro por la malbonaguloj. 16 Homo,
kiu erarforiĝis de la vojo de prudento, Ekloĝos en
komunumo de mortintoj. 17 Kiu amas gajecon, tiu
havos mankon; Kiu amas vinon kaj oleon, tiu ne
estos riĉa. 18 La malvirtulo estos liberiga anstataŭo
por la virtulo, Kaj malpiulo por piuloj. 19 Pli bone
estas loĝi en lando dezerta, Ol kun malpacema kaj
kolerema edzino. 20 Ĉarma trezoro kaj oleo estas en la
domo de saĝulo; Sed homo malsaĝa ĉion englutas.
21 Kiu celas justecon kaj bonecon, Tiu trovos vivon,
justecon, kaj honoron. 22 Kontraŭ urbon de fortuloj
eliras saĝulo, Kaj li faligas ĝian fortan fortikaĵon. 23
Kiu gardas sian buŝon kaj sian langon, Tiu gardas
sian animon kontraŭ malfeliĉoj. 24 Fiera malbonulo,
kiun oni nomas blasfemulo, Agas kun kolero kaj
malboneco. 25 La deziro de mallaborulo lin mortigas,
Ĉar liaj manoj ne volas labori. 26 Tuttage li forte
deziras; Sed virtulo donas kaj ne rifuzas. 27 Oferdono
de malvirtuloj estas abomenaĵo; Kiom pli, kiam li
ĝin alportas kiel pekoferon! 28 Mensoga atestanto
pereos; Sed homo, kiu mem aŭdis, parolos por ĉiam.
29 Malvirtulo tenas sian vizaĝon arogante; Sed virtulo
zorgas pri sia vojo. 30 Ne ekzistas saĝo, ne ekzistas
prudento, Ne ekzistas konsilo kontraŭ la Eternulo. 31
Ĉevalo estas preparata por la tago de milito; Sed la
helpo venas de la Eternulo.

22 Nomo bona estas pli preferinda, ol granda riĉeco;
Kaj bona estimo, ol arĝento kaj oro. 2 Riĉulo kaj
malriĉulo renkontiĝas: Ilin ambaŭ kreis la Eternulo. 3
Prudentulo antaŭvidas malbonon, kaj kaŝiĝas; Sed
naivuloj antaŭenpaŝas, kaj difektiĝas. 4 Por humileco
kaj timo antaŭ la Eternulo Oni ricevas riĉecon kaj
honoron kaj vivon. 5 Dornoj kaj retoj estas sur la
vojo de malbonagulo; Kiu gardas sian animon, tiu
malproksimiĝas de ili. 6 Instruu knabon konforme al
lia vojo, Kaj eĉ maljuniĝinte li ne dekliniĝos de ĝi. 7
Riĉulo regas super malriĉuloj, Kaj kiu prunteprenas,
tiu estas sklavo de la pruntedoninto. 8 Kiu semas
maljustaĵon, tiu rikoltos suferon, Kaj la kano de lia
krueleco rompiĝos. 9 Bonokululo estos benata; Ĉar li
donas el sia pano al malriĉulo. 10 Forpelu blasfemulon,
kaj foriros malpaco, Kaj ĉesiĝos malkonsento kaj
ofendo. 11 Kiu amas purecon de koro kaj agrable
parolas, Al tiu la reĝo estas amiko. 12 La okuloj de
la Eternulo gardas la prudenton; Sed la vortojn de
maliculo Li renversas. 13 Mallaborulo diras: Leono
estas ekstere, Mi povus esti mortigita meze de la
strato. 14 La buŝo de malĉastulino estas profunda
foso; Kiun la Eternulo koleras, tiu tien enfalas. 15
Malsaĝeco forte sidas en la koro de knabo; Sed vergo
punanta ĝin elpelas el ĝi. 16 Kiu premas malriĉulon,
por pligrandigi sian riĉecon, Tiu donas al riĉulo, por
ke li malriĉiĝu. 17 Klinu vian orelon kaj aŭskultu
vortojn de saĝuloj, Kaj direktu vian koron al mia
instruo; 18 Ĉar ili estos agrablaj, se vi gardos ilin en
via interno; Ili estos ĉiuj pretaj sur viaj lipoj. 19 Ke al
la Eternulo estu via fido, Tion mi instruis al vi hodiaŭ.
20 Ĉu mi ne skribis al vi tion trifoje Kun konsiloj kaj
scio, 21 Por sciigi al vi la ĝustecon de la paroloj de
vero, Por ke vi transdonu la parolojn de vero al tiuj,
kiuj vin sendis? 22 Ne prirabu malriĉulon, pro tio,
ke li estas malriĉa; Kaj ne premu senhavulon ĉe la
pordego; 23 Ĉar la Eternulo defendos ilian aferon Kaj
dispremos iliajn premantojn. 24 Ne amikiĝu kun homo
kolerema, Kaj ne komunikiĝu kun homo flamiĝema;
25 Ke vi ne lernu lian vojon Kaj ne ricevu reton por
via animo. 26 Ne estu inter tiuj, kiuj firmigas per
mano, Kiuj garantias por ŝuldoj. 27 Se vi ne havos per
kio pagi, Oni ja prenos vian litaĵon de sub vi. 28 Ne
forŝovu la antikvajn limojn, Kiujn faris viaj patroj.
29 Se vi vidas homon lertan en sia profesio, li staros
antaŭ reĝoj; Li ne staros antaŭ maleminentuloj.

23 Kiam vi sidiĝos, por manĝi kun reganto, Rigardu
bone, kio estas antaŭ vi; 2 Kaj vi metu tranĉilon
al via gorĝo, Se vi estas avidulo. 3 Ne deziru liajn
bongustajn manĝojn; Ĉar ĝi estas trompa pano. 4 Ne

penu riĉiĝi; Forlasu vian pripensadon. 5 Ĉu vi direktos
viajn okulojn al ĝi? ĝi jam ne ekzistos; Ĉar riĉeco faras
al si flugilojn kiel aglo, kaj forflugas al la ĉielo. 6 Ne
manĝu panon de malbondeziranto, Kaj ne deziru liajn
bongustajn manĝojn. 7 Ĉar kiaj estas la pensoj en lia
animo, tia li ankaŭ estas: Manĝu kaj trinku, li diros al
vi, Sed lia koro ne estas kun vi. 8 La pecon, kiun vi
manĝis, vi elvomos; Kaj vane vi perdis viajn agrablajn
vortojn. 9 En la orelojn de malsaĝulo ne parolu; Ĉar li
malŝatos la saĝecon de viaj vortoj. 10 Ne forŝovu la
antikvajn limojn, Kaj sur la kampon de orfoj ne iru.
11 Ĉar ilia Liberiganto estas forta; Li defendos ilian
aferon kontraŭ vi. 12 Elmetu vian koron al instruo Kaj
viajn orelojn al paroloj de prudento. 13 Ne malvolu
puni knabon: Se vi batos lin per kano, li ne mortos.
14 Vi batos lin per kano, Kaj lian animon vi savos de
Ŝeol. **(Sheol h7585)** 15 Mia filo, se via koro estos saĝa,
Tiam ĝojos ankaŭ mia koro. 16 Kaj mia internaĵo
ĝojos, Kiam viaj lipoj parolos ĝustaĵon. 17 Via koro
sin tiru ne al pekuloj, Sed al timo antaŭ la Eternulo
ĉiutage. 18 Ĉar ekzistas estonteco, Kaj via espero
ne perdiĝos. 19 Aŭskultu vi, mia filo, kaj estu saĝa,
Kaj direktu vian koron al la ĝusta vojo. 20 Ne estu
inter la drinkantoj de vino, Inter tiuj, kiuj manĝas
tro da viando; 21 Ĉar drinkemulo kaj manĝegemulo
malriĉiĝos, Kaj dormemulo havos sur si ĉifonaĵojn. 22
Aŭskultu vian patron, kiu vin naskigis, Kaj ne malŝatu
vian patrinon, kiam ŝi maljuniĝos. 23 Veron aĉetu,
kaj ne vendu saĝon Kaj instruon kaj prudenton. 24
Grandan ĝojon havas patro de virtulo, Kaj naskinto de
saĝulo ĝojos pro li. 25 Via patro kaj via patrino ĝojos,
Kaj via naskintino triumfos. 26 Donu, mia filo, vian
koron al mi, Kaj al viaj okuloj plaĉu miaj vojoj. 27 Ĉar
malĉastulino estas profunda foso, Kaj fremda edzino
estas malvasta puto. 28 Ŝi embuskas kiel rabisto, Kaj
kolektas ĉirkaŭ si perfidulojn. 29 Ĉe kiu estas ploro?
ĉe kiu estas ĝemoj? ĉe kiu estas malpaco? Ĉe kiu estas
plendoj? ĉe kiu estas senkaŭzaj batoj? Ĉe kiu estas
malklaraj okuloj? 30 Ĉe tiuj, kiuj sidas malfrue ĉe vino,
Ĉe tiuj, kiuj venas, por gustumi aroman trinkaĵon. 31
Ne rigardu la vinon, kiel ruĝa ĝi estas, Kiel ĝi brilas en
la pokalo, kiel glate ĝi eniras: 32 En la fino ĝi mordas
kiel serpento Kaj pikas kiel vipuro. 33 Viaj okuloj
vidos fremdaĵojn, Kaj via koro parolos malĝustaĵojn.
34 Kaj vi estos kiel dormanto meze de la maro, Kaj
kiel dormanto sur la supro de masto. 35 Ili batis min,
sed ĝi min ne doloris; Ili frapis min, sed mi ne sentis;
Kiam mi vekiĝos, mi denove tion serĉos.

24 Ne sekvu malbonajn homojn, Kaj ne deziru esti
kun ili; 2 Ĉar ilia koro pensas pri perfortaĵo, Kaj
ilia buŝo parolas malbonaĵon. 3 Per saĝo konstruiĝas
domo, Kaj per prudento ĝi fortikiĝas; 4 Kaj per sciado
la ĉambroj pleniĝas Per ĉia havo grandvalora kaj
agrabla. 5 Homo saĝa havas forton, Kaj homo prudenta
estas potenca. 6 Kun pripenso faru militon; Kaj venko
venas per multe da konsilantoj. 7 Tro alta estas la
saĝo por malsaĝulo; Ĉe la pordego li ne malfermos
sian buŝon. 8 Kiu intencas fari malbonon, Tiun oni
nomas maliculo. 9 Malico de malsaĝulo estas peko;
Kaj blasfemanto estas abomenaĵo por homo. 10 Se
vi montriĝis malforta en tago de mizero, Via forto
estas ja malgranda. 11 Savu tiujn, kiujn oni prenis por
mortigi, Kaj ne fortiriĝu de tiuj, kiuj estas kondamnitaj
al morto. 12 Se vi diras: Ni tion ne sciis, La esploranto
de koroj ja komprenas, Kaj la gardanto de via animo ja
scias, Kaj Li redonas al homo laŭ liaj faroj. 13 Manĝu,
mia filo, mielon, ĉar ĝi estas bona; Kaj la mieltavolo
estas dolĉa por via gorĝo; 14 Tia estas por via animo la
sciado de saĝo, se vi ĝin trovis, Kaj ekzistas estonteco,
kaj via espero ne pereos. 15 Ne insidu, ho malvirtulo,
kontraŭ la domo de virtulo; Ne ataku lian ripozejon;
16 Ĉar sep fojojn virtulo falos, kaj tamen leviĝos;
Sed malvirtuloj implikiĝas en la malfeliĉo. 17 Kiam
falas via malamiko, ne ĝoju, Kaj ĉe lia malfeliĉo via
koro ne plezuriĝu; 18 Ĉar eble la Eternulo vidos,
kaj tio ne plaĉos al Li, Kaj Li returnos de li Sian
koleron. 19 Ne koleru kontraŭ malbonfarantoj, Kaj
ne enviu la malvirtulojn; 20 Ĉar la malbonulo ne
havos estontecon; La lumilo de malvirtuloj estingiĝos.
21 Timu, mia filo, la Eternulon kaj la reĝon; Kun
ribeluloj ne komunikiĝu. 22 Ĉar subite venos ilia
pereo; Kaj kiu scias, kiam venos la puno de ambaŭ?
23 Ankaŭ ĉi tio estas vortoj de saĝuloj: Konsideri
personojn ĉe juĝado estas ne bone. 24 Kiu diras al
malvirtulo: Vi estas virtulo, Tiun malbenos popoloj,
tiun malamos gentoj. 25 Sed kiuj faras riproĉojn, tiuj
plaĉas, Kaj sur ilin venos bona beno. 26 Kiu respondas
ĝustajn vortojn, Tiu kisas per la lipoj. 27 Plenumu
vian laboron ekstere, Pretigu ĉion sur via kampo; Kaj
poste aranĝu vian domon. 28 Ne atestu sen kaŭzo
kontraŭ via proksimulo; Ĉu vi trompus per via buŝo?
29 Ne diru: Kiel li agis kontraŭ mi, tiel mi agos kontraŭ

li; Mi redonos al la homo laŭ lia faro. 30 Mi pasis tra
kampo de homo maldiligenta Kaj tra vinberĝardeno
de sensaĝulo; 31 Kaj jen ĉie elkreskis urtiko, Ĉio estas
kovrita de dornoj, Kaj la ŝtona muro estas detruita.
32 Kaj kiam mi vidis, mi prenis ĝin en mian koron,
Mi rigardis, kaj ricevis instruon: 33 Iom da dormo,
iom da dormeto, Iom da kunmeto de la manoj por
kuŝado; 34 Kaj venos via malriĉeco kiel rabisto, Kaj via
senhaveco kiel viro armita.

**25** Ankaŭ ĉi tio estas sentencoj de Salomono, kiujn
kolektis la viroj de Ĥizkija, reĝo de Judujo. 2
Honoro de Dio estas kaŝi aferon; Sed honoro de reĝoj
estas esplori aferon. 3 La ĉielo estas alta, la tero estas
profunda, Kaj la koro de reĝoj estas neesplorebla.
4 Forigu de arĝento la almiksaĵon, Kaj la puriganto
ricevos vazon. 5 Forigu malvirtulon de la reĝo, Kaj lia
trono fortikiĝos en justeco. 6 Ne montru vin granda
antaŭ la reĝo, Kaj sur la loko de eminentuloj ne
stariĝu; 7 Ĉar pli bone estas, se oni diros al vi: Leviĝu ĉi
tien, Ol se oni malaltigos vin antaŭ eminentulo, Kiun
vidis viaj okuloj. 8 Ne komencu tuj disputi; Ĉar kion vi
faros poste, kiam via proksimulo vin hontigos? 9 Faru
disputon kun via proksimulo mem, Sed sekreton de
aliulo ne malkaŝu; 10 Ĉar alie aŭdanto vin riproĉos,
Kaj vian babilon vi jam ne povos repreni. 11 Vorto
dirita en ĝusta tempo Estas kiel oraj pomoj sur retaĵo
arĝenta. 12 Kiel ora orelringo kaj multekosta kolringo,
Tiel estas saĝa admonanto por aŭskultanta orelo. 13
Kiel malvarmo de neĝo en la tempo de rikolto, Tiel
estas fidela sendito por siaj sendintoj: Li revigligas
la animon de sia sinjoro. 14 Kiel nuboj kaj vento sen
pluvo, Tiel estas homo, kiu fanfaronas per dono, kiun
li ne faras. 15 Per pacienco oni altiras al si potenculon,
Kaj mola parolo rompas oston. 16 Kiam vi trovis
mielon, manĝu, kiom vi bezonas, Por ke vi ne fariĝu
tro sata kaj ne elvomu ĝin. 17 Detenu vian piedon de la
domo de via proksimulo; Ĉar alie vi tedus lin kaj li vin
malamus. 18 Kiel martelo kaj glavo kaj akra sago Estas
tiu homo, kiu parolas pri sia proksimulo malveran
ateston. 19 Kiel putra dento kaj malforta piedo Estas
nefidinda espero en tago de mizero. 20 Kiel demeto
de vesto en tempo de malvarmo, kiel vinagro sur
natro, Tiel estas kantado de kantoj al koro suferanta.
21 Se via malamanto estas malsata, manĝigu al li
panon; Kaj se li estas soifa, trinkigu al li akvon; 22 Ĉar
fajrajn karbojn vi kolektos sur lia kapo, Kaj la Eternulo
vin rekompencos. 23 Norda vento kaŭzas pluvon,
Kaj ĉagrenita vizaĝo kaŝatan parolon. 24 Pli bone
estas loĝi sur angulo de tegmento, Ol kun malpacema
edzino en komuna domo. 25 Kiel malvarma akvo por
suferanto de soifo, Tiel estas bona sciigo el lando
malproksima. 26 Virtulo, kiu falas antaŭ malvirtulo,
Estas malklara fonto kaj malbonigita puto. 27 Ne bone
estas manĝi tro multe da mielo; Kaj ne glore estas
serĉi sian gloron. 28 Homo, kiu ne povas regi sian
spiriton, Estas urbo detruita, kiu ne havas muron.

**26** Kiel neĝo en somero, kaj kiel pluvo en tempo de
rikolto, Tiel ne konvenas honoro por malsaĝulo.
2 Kiel birdo forleviĝas, kiel hirundo forflugas, Tiel
senkaŭza malbeno ne efektiviĝas. 3 Vipo estas por
ĉevalo, brido por azeno, Kaj bastono por la dorso
de malsaĝuloj. 4 Ne respondu al malsaĝulo laŭ lia
malsaĝeco, Por ke vi mem ne fariĝu egala al li. 5
Respondu al malsaĝulo laŭ lia malsaĝeco, Por ke li
ne estu saĝulo en siaj propraj okuloj. 6 Kiu komisias
aferon al malsaĝulo, Tiu tranĉas al si la piedojn kaj
sin suferigas. 7 Kiel la kruroj de lamulo pendas peze,
Tiel estas sentenco en la buŝo de malsaĝuloj. 8 Kiel
iu, kiu alligas ŝtonon al ĵetilo, Tiel estas tiu, kiu
faras honoron al malsaĝulo. 9 Kiel dorna kano en la
mano de ebriulo, Tiel estas sentenco en la buŝo de
malsaĝuloj. 10 Kompetentulo ĉion bone faras; Sed
kiu dungas pasantojn, tiu dungas malsaĝulojn. 11
Kiel hundo revenas al sia vomitaĵo, Tiel malsaĝulo
ripetas sian malsaĝaĵon. 12 Ĉu vi vidas homon, kiu
estas saĝa en siaj okuloj? Estas pli da espero por
malsaĝulo ol por li. 13 Maldiligentulo diras: Leono
estas sur la vojo, Leono estas sur la stratoj. 14 Pordo
turniĝas sur sia hoko, Kaj maldiligentulo sur sia lito.
15 Maldiligentulo ŝovas sian manon en la poton, Kaj
ne volas venigi ĝin al sia buŝo. 16 Maldiligentulo estas
en siaj okuloj pli saĝa, Ol sep veraj saĝuloj. 17 Pasanto,
kiu sin miksas en malpropran disputon, Estas kiel
iu, kiu kaptas hundon je la oreloj. 18 Kiel frenezulo,
kiu ĵetas fajron, Sagojn, kaj morton, 19 Tiel estas
homo, kiu trompas sian proksimulon, Kaj diras: Mi
ja ŝercas. 20 Kie ne estas ligno, estingiĝas la fajro;
Kaj se ne estas kalumnianto, ĉesiĝas malpaco. 21
Karbo servas por ardaĵo, ligno por fajro, Kaj homo
malpacema por provoki malpacon. 22 La vortoj de
kalumnianto estas kiel frandaĵoj, Kaj ili penetras en la
profundon de la ventro. 23 Varmegaj lipoj kun malica
koro Estas nepurigita arĝento, kiu kovras argilaĵon.
24 Malamanto havas maskitajn parolojn, Kaj en sia

koro li preparas malicon. 25 Kiam li ĉarmigas sian
voĉon, ne kredu al li; Ĉar sep abomenaĵoj estas en
lia koro. 26 Kiu trompe kaŝas malamon, Tiu aperigos
sian malbonecon en popola kunveno. 27 Kiu fosas
foson, tiu falos en ĝin; Kaj kiu rulas ŝtonon, al tiu ĝi
revenos. 28 Mensogema lango malamas tiujn, kiujn ĝi
dispremis; Kaj hipokrita buŝo kaŭzas pereon.

27 Ne fanfaronu pri la morgaŭa tago; Ĉar vi ne scias,
kion naskos la tago. 2 Alia vin laŭdu, sed ne via
buŝo; Fremdulo, sed ne viaj lipoj. 3 Peza estas ŝtono,
kaj sablo estas ŝarĝo; Sed kolero de malsaĝulo estas
pli peza ol ambaŭ. 4 Kolero estas kruelaĵo, kaj furiozo
estas superakvego; Sed kiu sin tenos kontraŭ envio?
5 Pli bona estas riproĉo nekaŝita, Ol amo kaŝita. 6
Fidelkoraj estas la batoj de amanto; Sed tro multaj
estas la kisoj de malamanto. 7 Sata animo malŝatas
mieltavolon, Sed por malsata animo ĉio maldolĉa
estas dolĉa. 8 Kiel birdo, kiu forlasis sian neston,
Tiel estas homo, kiu forlasis sian lokon. 9 Oleo kaj
odorfumaĵo ĝojigas la koron, Kaj la konsilo de amiko
estas dolĉaĵo por la animo. 10 Ne forlasu vian amikon
kaj la amikon de via patro, Kaj en la domon de via
frato ne iru en la tago de via mizero; Pli bona estas
najbaro proksima, ol frato malproksima. 11 Estu saĝa,
mia filo, kaj ĝojigu mian koron; Kaj mi havos kion
respondi al mia insultanto. 12 Prudentulo antaŭvidas
malbonon, kaj kaŝiĝas; Sed naivuloj antaŭenpaŝas, kaj
difektiĝas. 13 Prenu la veston de tiu, kiu garantiis por
aliulo; Kaj pro la fremduloj prenu de li garantiaĵon. 14
Kiu frue matene benas sian proksimulon per laŭta
voĉo, Tiu estos opiniata malbenanto. 15 Defluilo en
pluva tago Kaj malpacema edzino estas egalaj. 16 Kiu
ŝin retenas, tiu retenas venton Kaj volas kapti oleon
per sia dekstra mano. 17 Fero akriĝas per fero, Kaj
homon akrigas la rigardo de lia proksimulo. 18 Kiu
gardas figarbon, tiu manĝos ĝiajn fruktojn; Kaj kiu
gardas sian sinjoron, tiu estos honorata. 19 Kiel en
la akvo vizaĝo speguliĝas al vizaĝo, Tiel la koro de
homo estas kontraŭ alia koro. 20 Ŝeol kaj la abismo
neniam satiĝas; Kaj ankaŭ la okuloj de homo neniam
satiĝas. (Sheol h7585) 21 Kiel fandujo por arĝento kaj
forno por oro, Tiel estas por homo la buŝo de lia
laŭdanto. 22 Se vi pistos malsaĝulon en pistujo inter
griaĵo, Lia malsaĝeco de li ne apartiĝos. 23 Bone konu
viajn ŝafojn, Atentu viajn brutarojn. 24 Ĉar riĉeco ne
daŭras eterne, Kaj krono ne restas por ĉiuj generacioj.
25 Aperas herbo, montriĝas verdaĵo, Kaj kolektiĝas
kreskaĵoj de la montoj. 26 Ŝafidoj estas, por vesti
vin, Kaj kaproj, por doni al vi la eblon aĉeti kampon.
27 Estas sufiĉe da kaprina lakto, por nutri vin, por
nutri vian domon, Kaj por subteni la vivon de viaj
servantinoj.

28 Malvirtulo kuras, kiam neniu persekutas; Sed
virtuloj estas sentimaj kiel leono. 2 Kiam lando
pekas, ĝi havas multe da estroj; Sed se regas homo
prudenta kaj kompetenta, li regas longe. 3 Homo
malriĉa, kiu premas malriĉulojn, Estas kiel pluvo
batanta, sed ne dononta panon. 4 Kiuj forlasis la
leĝojn, tiuj laŭdas malvirtulon; Sed la observantoj
de la leĝoj indignas kontraŭ li. 5 Malbonaj homoj ne
komprenas justecon; Sed la serĉantoj de la Eternulo
komprenas ĉion. 6 Pli bona estas malriĉulo, kiu iras
en sia senkulpeco, Ol homo, kiu iras malĝustan vojon,
kvankam li estas riĉa. 7 Kiu observas la leĝojn, tiu estas
filo prudenta; Sed kunulo de malĉastuloj hontigas sian
patron. 8 Kiu pligrandigas sian havon per procentegoj
kaj troprofito, Tiu kolektas ĝin por kompatanto de
malriĉuloj. 9 Kiu forklinas sian orelon de aŭdado
de instruo, Ties eĉ preĝo estas abomenaĵo. 10 Kiu
forlogas virtulojn al vojo malbona, Tiu mem falos
en sian foson; Sed la senkulpuloj heredos bonon. 11
Riĉulo estas saĝa en siaj okuloj; Sed saĝa malriĉulo lin
tute travidas. 12 Kiam triumfas virtuloj, estas granda
gloro; Sed kiam altiĝas malvirtuloj, tiam homoj sin
kaŝas. 13 Kiu kaŝas siajn pekojn, tiu ne estos feliĉa;
Sed kiu ilin konfesas kaj forlasas, tiu estos pardonita.
14 Bone estas al homo, kiu ĉiam timas; Sed kiu havas
malmolan koron, tiu falos en malfeliĉon. 15 Leono
krieganta kaj urso avida Estas malvirta reganto super
malriĉa popolo. 16 Se reganto estas neprudenta,
tiam fariĝas multe da maljustaĵoj; Sed kiu malamas
maljustan profiton, tiu longe vivos. 17 Homo, kies
konscienco estas ŝarĝita de mortigo, Kuros al foso; kaj
oni lin ne haltigu. 18 Kiu iras en senpekeco, tiu estos
savita; Sed kiu iras malĝustan vojon, tiu subite falos.
19 Kiu prilaboras sian teron, tiu havos sate da pano;
Sed kiu serĉas vantaĵojn, tiu havos plenan malriĉecon.
20 Homon fidelan oni multe benas; Sed kiu rapidas
riĉiĝi, tiu ne restos sen puno. 21 Konsideri personojn
ne estas bone; Pro peco da pano homo pekus. 22
Homo enviema rapidas al riĉeco, Kaj li ne scias, ke
malriĉeco lin atendas. 23 Kiu faras riproĉojn al homo,

tiu poste trovos pli da danko, Ol tiu, kiu flatas per la
lango. 24 Kiu rabas de sia patro kaj patrino, kaj diras:
Ĝi ne estas peko, Tiu estas kamarado de mortigisto. 25
Fierulo kaŭzas malpacojn; Sed kiu fidas la Eternulon,
tiu estos bonstata. 26 Kiu fidas sin mem, tiu estas
malsaĝa; Sed kiu tenas sin prudente, tiu estos savita.
27 Kiu donas al malriĉulo, tiu ne havos mankon; Sed
kiu kovras siajn okulojn, tiu estas multe malbenata.
28 Kiam malvirtuloj altiĝas, homoj kaŝiĝas; Sed kiam
ili pereas, tiam multiĝas virtuloj.

**29** Se homo ofte admonita restos obstina, Li subite
pereos sen ia helpo. 2 Kiam altiĝas virtuloj, la
popolo ĝojas; Sed kiam regas malvirtulo, la popolo
ĝemas. 3 Homo, kiu amas saĝon, ĝojigas sian patron;
Sed kiu komunikiĝas kun malĉastulinoj, tiu disperdas
sian havon. 4 Reĝo per justeco fortikigas la landon;
Sed donacamanto ĝin ruinigas. 5 Homo, kiu flatas
al sia proksimulo, Metas reton antaŭ liaj piedoj.
6 Per sia pekado malbona homo sin implikas; Sed
virtulo triumfas kaj ĝojas. 7 Virtulo penas ekkoni
la aferon de malriĉuloj; Sed malvirtulo ne povas
kompreni. 8 Homoj blasfemantaj indignigas urbon;
Sed saĝuloj kvietigas koleron. 9 Se saĝa homo havas
juĝan aferon kun homo malsaĝa, Tiam, ĉu li koleras,
ĉu li ridas, li ne havas trankvilon. 10 Sangaviduloj
malamas senkulpulon; Sed virtuloj zorgas pri lia
vivo. 11 Sian tutan koleron aperigas malsaĝulo; Sed
saĝulo ĝin retenas. 12 Se reganto atentas mensogon,
Tiam ĉiuj liaj servantoj estas malvirtuloj. 13 Malriĉulo
kaj procentegisto renkontiĝas; La Eternulo donas
lumon al la okuloj de ambaŭ. 14 Se reĝo juĝas juste
malriĉulojn, Lia trono fortikiĝas por ĉiam. 15 Kano
kaj instruo donas saĝon; Sed knabo, lasita al si mem,
hontigas sian patrinon. 16 Kiam altiĝas malvirtuloj,
tiam multiĝas krimoj; Sed virtuloj vidos ilian falon. 17
Punu vian filon, kaj li vin trankviligos, Kaj li donos
ĝojon al via animo. 18 Se ne ekzistas profetaj predikoj,
tiam popolo fariĝas sovaĝa; Sed bone estas al tiu, kiu
observas la leĝojn. 19 Per vortoj sklavo ne instruiĝas;
Ĉar li komprenas, sed ne obeas. 20 Ĉu vi vidas homon,
kiu tro rapidas kun siaj vortoj? Estas pli da espero por
malsaĝulo ol por li. 21 Se oni de infaneco kutimigas
sklavon al dorlotiĝado, Li poste fariĝas neregebla. 22
Kolerema homo kaŭzas malpacojn, Kaj flamiĝema
kaŭzas multajn pekojn. 23 La fiereco de homo lin
malaltigos; Sed humilulo atingos honoron. 24 Kiu
dividas kun ŝtelisto, tiu malamas sian animon; Li
aŭdas la ĵuron kaj nenion diras. 25 Timo antaŭ homoj
faligas en reton; Sed kiu fidas la Eternulon, tiu estas
ŝirmita. 26 Multaj serĉas favoron de reganto; Sed la
sorto de homo dependas de la Eternulo. 27 Maljusta
homo estas abomenaĵo por virtuloj; Kaj kiu iras la
ĝustan vojon, tiu estas abomenaĵo por malvirtulo.

**30** Vortoj de Agur, filo de Jake. Profeta parolo de
tiu viro al Itiel, al Itiel kaj Ukal. 2 Mi estas la
plej malklera homo, Kaj homan prudenton mi ne
posedas. 3 Kaj mi ne lernis saĝon, Kaj pri la Sanktulo
mi ne havas ekkonon. 4 Kiu leviĝis en la ĉielon, kaj
malleviĝis? Kiu kolektis la venton en siajn mankavojn?
Kiu ligis la akvon en la veston? Kiu aranĝis ĉiujn
limojn de la tero? Kia estas lia nomo? kaj kia estas
la nomo de lia filo? Ĉu vi scias? 5 Ĉiu diro de Dio
estas pura; Li estas ŝildo por tiuj, kiuj Lin fidas. 6
Ne aldonu al Liaj vortoj, Por ke Li ne punu vin, kaj
por ke vi ne aperu mensoganto. 7 Du aferojn mi
petis de Vi; Ne rifuzu al mi, antaŭ ol mi mortos: 8
Falsaĵon kaj mensogaĵon forigu de mi; Malriĉecon
kaj riĉecon ne donu al mi; Nutru min per tiom da
pano, kiom mi bezonas. 9 Ĉar alie mi eble trosatiĝus
kaj neus, kaj dirus: Kiu estas la Eternulo? Aŭ eble mi
malriĉiĝus kaj ŝtelus, Kaj malbonuzus la nomon de
mia Dio. 10 Ne kalumniu sklavon antaŭ lia sinjoro,
Por ke li ne malbenu vin kaj vi ne fariĝu kulpulo.
11 Estas generacio, kiu malbenas sian patron Kaj ne
benas sian patrinon; 12 Generacio, kiu estas pura en
siaj okuloj Kaj tamen ne laviĝis de siaj malpuraĵoj; 13
Generacio, kiu tiel alte tenas siajn okulojn Kaj tiel
levas siajn palpebrojn; 14 Generacio, kies dentoj estas
glavoj kaj kies makzeloj estas tranĉiloj, Por formanĝi
la malriĉulojn de la tero kaj la mizerulojn inter la
homoj. 15 Hirudo havas du filinojn, kiuj krias: Donu,
donu; Ili tri neniam satiĝas. Kvar objektoj ne diras:
Sufiĉe: 16 Ŝeol; senfrukta ventro; la tero ne satiĝas
de akvo; kaj la fajro ne diras: Sufiĉe. (Sheol h7585) 17
Okulon, kiu mokas la patron Kaj malŝatas obeadon al
la patrino, Elpikos korvoj ĉe la rivero kaj formanĝos
aglidoj. 18 Tri aferoj estas nekompreneblaj por mi, Kaj
kvaran mi ne scias: 19 La vojon de aglo en la aero; La
vojon de serpento sur roko; La vojon de ŝipo meze de
la maro; Kaj la vojon de viro ĉe virgulino. 20 Tia estas
la vojo de virino adultanta: Ŝi manĝas, viŝas la buŝon,
Kaj diras: Mi faris nenian pekon. 21 Sub tri objektoj

tremas la tero, Kaj kvar ĝi ne povas porti: 22 Sklavon,
kiam li fariĝis reĝo; Malsaĝulon, kiam li tro satiĝis
de pano; 23 Malamatan virinon, kiam ŝi edziniĝis,
Kaj sklavinon, kiam ŝi elpelis sian sinjorinon. 24 Kvar
estas malgranduloj sur la tero, Kaj tamen ili estas tre
saĝaj: 25 La formikoj, popolo ne forta, Tamen ili en
somero pretigas al si manĝaĵon; 26 La hirakoj, popolo
senforta, Tamen ili faras siajn domojn en la roko; 27
La akridoj ne havas reĝon, Kaj tamen ili ĉiuj eliras en
vicoj; 28 La lacerto kroĉiĝas per siaj manoj, Tamen ĝi
estas en reĝaj palacoj. 29 Ekzistas tri, kiuj bone iras,
Kaj kvar, kiuj marŝas bele: 30 La leono, plej forta el la
bestoj, Cedas al neniu; 31 Cervo kun bonaj lumboj;
virkapro; Kaj reĝo, kiun neniu povas kontraŭstari. 32
Se vi agis malsaĝe pro via fiereco, Kaj se vi intencis
malbonon, Tiam metu la manon sur la buŝon. 33
Ĉar batado de lakto produktas buteron, Ekbato de
nazo aperigas sangon, Kaj incitado de kolero kaŭzas
malpacon.

**31** Vortoj de la reĝo Lemuel, instruo, kiun donis al
li lia patrino. 2 Ho mia filo, ho filo de mia ventro!
Ho filo de miaj promesoj! 3 Ne donu al la virinoj vian
forton, Nek viajn agojn al la pereigantoj de reĝoj. 4
Ne al la reĝoj, ho Lemuel, ne al la reĝoj konvenas
trinki vinon, Nek al la princoj deziri ebriigaĵojn. 5 Ĉar
drinkinte, ili povas forgesi la leĝojn, Kaj ili malĝustigos
la juĝon de ĉiuj prematoj. 6 Donu ebriigaĵon al la
pereanto, Kaj vinon al tiu, kiu havas suferantan
animon. 7 Li trinku, kaj forgesu sian malriĉecon, Kaj
li ne plu rememoru sian malfeliĉon. 8 Malfermu vian
buŝon por senvoĉulo, Por la defendo de ĉiuj forlasitaj.
9 Malfermu vian buŝon, por juĝi juste, Por defendi
malriĉulon kaj senhavulon. 10 Se iu trovis kapablan
edzinon, Ŝia valoro estas pli granda ol perloj. 11
Fidas ŝin la koro de ŝia edzo, Kaj havo ne mankos.
12 Ŝi redonas al li bonon, sed ne malbonon, En la
daŭro de ŝia tuta vivo. 13 Ŝi serĉas lanon kaj linon,
Kaj volonte laboras per siaj manoj. 14 Ŝi estas kiel
ŝipo de komercisto; De malproksime ŝi alportas sian
panon. 15 Ŝi leviĝas, kiam estas ankoraŭ nokto, Kaj ŝi
disdonas manĝon al sia domanaro Kaj porciojn al siaj
servantinoj; 16 Ŝi pensas pri kampo, kaj aĉetas ĝin; Per
la enspezoj de sia mano ŝi plantas vinberĝardenon.
17 Ŝi zonas siajn lumbojn per forto Kaj fortikigas
siajn brakojn. 18 Ŝi komprenas, ke ŝia komercado
estas bona; Ŝia lumilo ne estingiĝas en la nokto. 19
Ŝi etendas sian manon al la ŝpinilo, Kaj ŝiaj fingroj
tenas la ŝpinturnilon. 20 Ŝi malfermas sian manon al
la malriĉulo Kaj etendas siajn manojn al la senhavulo.
21 Ŝi ne timas la neĝon por sia domo, Ĉar ŝia tuta
domanaro estas vestita per ruĝa teksaĵo. 22 Ŝi faras al
si kovrojn; Delikata tolo kaj purpuro estas ŝiaj vestoj.
23 Ŝia edzo estas konata ĉe la pordego, Kie li sidas kune
kun la maljunuloj de la lando. 24 Ŝi faras teksaĵon
kaj vendas, Kaj zonojn ŝi donas al la komercisto. 25
Fortika kaj bela estas ŝia vesto, Kaj ŝi ridas pri la
venonta tago. 26 Sian buŝon ŝi malfermas kun saĝo;
Bonkora instruo estas sur ŝia lango. 27 Ŝi kontrolas
la iradon de aferoj en sia domo, Kaj ŝi ne manĝas
panon en senlaboreco. 28 Leviĝas ŝiaj filoj kaj ŝin
gratulas; Ŝia edzo ŝin laŭdegas, dirante: 29 Multaj
filinoj estas bravaj, Sed vi superas ĉiujn. 30 Ĉarmeco
estas trompa, kaj beleco estas vantaĵo; Virino, kiu
timas la Eternulon, estos glorata. 31 Donu al ŝi laŭ la
fruktoj de ŝiaj manoj; Kaj ŝiaj faroj ŝin gloros ĉe la
pordegoj.

# Predikanto

**1** Vortoj de la Predikanto, filo de David, reĝo en
Jerusalem. 2 Vantaĵo de vantaĵoj, diris la Predikanto;
vantaĵo de vantaĵoj, ĉio estas vantaĵo. 3 Kian profiton
havas la homo de ĉiuj siaj laboroj, kiujn li laboras sub
la suno? 4 Generacio foriras kaj generacio venas, kaj
la tero restas eterne. 5 Leviĝas la suno kaj subiras la
suno, kaj al sia loko ĝi rapidas, kaj tie ĝi leviĝas. 6 Iras
al sudo kaj reiras al nordo, turniĝas, turniĝas en sia
irado la vento, kaj al siaj rondoj revenas la vento. 7
Ĉiuj riveroj iras al la maro, sed la maro ne pleniĝas; al
la loko, al kiu la riveroj alfluas, ili alfluas ĉiam denove.
8 Ĉiuj aferoj estas lacigaj, ne povas homo tion eldiri;
ne satiĝas la okulo de vidado, kaj ne pleniĝas la orelo
de aŭdado. 9 Kio estis, tio estos; kaj kio estis farata,
tio estos farata; kaj ekzistas nenio nova sub la suno.
10 Ekzistas io, pri kio oni diras: Vidu, ĉi tio estas nova;
sed ĝi estis jam en la eterna tempo, kiu estis antaŭ
ni. 11 Ne restis memoro pri la antaŭuloj; kaj ankaŭ
pri la posteuloj, kiuj estos, ne restos memoro ĉe tiuj,
kiuj estos poste. 12 Mi, Predikanto, estis reĝo super
Izrael en Jerusalem. 13 Kaj mi decidis en mia koro
esplori kaj ekzameni per la saĝo ĉion, kio fariĝas sub
la ĉielo: ĉi tiun malfacilan okupon Dio donis al la
homidoj, por ke ili turmentiĝu per ĝi. 14 Mi vidis ĉiujn
aferojn, kiuj fariĝas sub la suno; kaj jen, ĉio estas
vantaĵo kaj entreprenoj ventaj. 15 Kurbigitan oni ne
povas rerektigi, kaj mankantan oni ne povas kalkuli.
16 Mi meditis kun mia koro tiele: Jen mi kreskigis kaj
multigis en mi sciencon pli ol ĉiuj, kiuj estis antaŭ
mi en Jerusalem; kaj mia koro penetris multon da
saĝo kaj scio. 17 Sed kiam mi dediĉis mian koron,
por ekkoni la saĝecon kaj ekkoni la malsaĝecon kaj
sensencecon, mi eksciis, ke ankaŭ ĉi tio estas ventaĵo.
18 Ĉar ĉe multe da saĝeco estas multe da zorgemeco;
kaj, kiu plimultigas siajn sciojn, tiu plimultigas siajn
dolorojn.

**2** Mi diris en mia koro: Lasu, mi elprovos vin per
ĝojo, kaj vi ĝuu bonon; sed jen ankaŭ ĉi tio estas
vantaĵo. 2 Pri la rido mi diris: Ĝi estas sensencaĵo! kaj
pri la ĝojo: Kion ĝi havigas? 3 Mi serĉis en mia koro,
kiel plezurigi mian korpon per vino, kaj, dum mia
koro min gvidas per saĝeco, sekvi ankaŭ malsaĝecon,
ĝis mi ekvidos, kio estas bona por la homidoj, kion
ili povus fari sub la ĉielo en la kalkulitaj tagoj de sia
vivo. 4 Mi entreprenis grandajn farojn: mi konstruis
al mi domojn, mi plantis al mi vinberejojn; 5 mi
aranĝis al mi ĝardenojn kaj arbaretojn, kaj plantis en
ili ĉiafruktajn arbojn; 6 mi aranĝis al mi akvujojn, por
akvumi el ili arbaretojn, kiuj kreskigas arbojn; 7 mi
akiris al mi sklavojn kaj sklavinojn, kaj domanojn mi
havis; ankaŭ da bruto granda kaj malgranda mi havis
pli multe, ol ĉiuj, kiuj estis antaŭ mi en Jerusalem; 8
mi kolektis al mi ankaŭ arĝenton kaj oron, kaj juvelojn
de reĝoj kaj landoj; mi havigis al mi kantistojn kaj
kantistinojn, kaj plezurojn de homidoj, kaj multajn
amantinojn. 9 Kaj mi pligrandigis kaj plimultigis ĉion
pli ol ĉiuj, kiuj estis antaŭ mi en Jerusalem, kaj mia
saĝeco restis kun mi. 10 Kaj ĉion, kion postulis miaj
okuloj, mi ne rifuzis al ili; mi fortenis mian koron de
nenia ĝojo, ĉar mia koro ĝojis pri ĉiuj miaj laboroj; kaj
ĉi tio estis mia rekompenco por ĉiuj miaj laboroj. 11
Kaj mi ekrigardis ĉiujn farojn, kiujn faris miaj manoj,
kaj ĉiujn laborojn, kiujn mi plenumis, por fari ilin: kaj
jen, ĉio estas vantaĵo kaj ventaĵo, kaj nenia profito
estas de ili sub la suno. 12 Kaj mi turnis min, por
rigardi saĝecon kaj malsaĝecon kaj sensencecon; ĉar
kion povas fari homo, venonta post reĝo, en komparo
kun tio, kion tiu jam antaŭ longe faris? 13 Kaj mi vidis,
ke havas superecon la saĝeco antaŭ la malsaĝeco, kiel
havas superecon lumo antaŭ mallumo. 14 La saĝulo
havas siajn okulojn en la kapo, kaj la malsaĝulo iras en
mallumo; sed mi ankaŭ eksciis, ke unu sorto atingas
ilin ĉiujn. 15 Kaj mi diris en mia koro: Ankaŭ min
atingos tia sama sorto, kiel la malsaĝulon; por kio do
mi estis pli saĝa? Kaj mi diris en mia koro, ke ankaŭ
ĉi tio estas vantaĵo. 16 Ĉar pri la saĝulo ne restos
memoro eterne tiel same, kiel pri la malsaĝulo; en la
tempoj estontaj ĉio estos forgesita. Kaj ho ve, mortas
saĝulo egale kiel malsaĝulo! 17 Kaj mi ekmalamis la
vivon; ĉar abomenindaj estas por mi la faroj, kiuj
fariĝas sub la suno, ĉar ĉio estas vantaĵo kaj ventaĵo.
18 Kaj mi ekmalamis ĉiun laboron, kiun mi laboris sub
la suno; ĉar mi devos lasi ĝin al homo, kiu estos post
mi. 19 Kaj kiu scias, ĉu estos saĝa aŭ malsaĝa tiu, kiu
ekposedos mian tutan laboron, pri kiu mi penis kaj
streĉis mian saĝon sub la suno? Ankaŭ ĉi tio estas
vantaĵo. 20 Kaj mi decidis, ke mia koro atendu nenion
de la tuta laboro, kiun mi laboris sub la suno. 21 Ĉar
ofte oni vidas homon, kiu laboras en saĝo, scienco,
kaj talento, kaj li devas fordoni sian akiron al homo,
kiu ne laboris por ĝi; ĉi tio ankaŭ estas vantaĵo kaj

granda malbono. 22 Kaj kio restas al la homo de lia
tuta laborado kaj de la zorgoj de lia koro, kion li
laboras sub la suno? 23 Ĉar ĉiuj liaj tagoj estas suferoj,
kaj liaj okupoj estas maltrankvileco; eĉ en la nokto ne
trankviliĝas lia koro; ankaŭ ĉi tio estas vantaĵo. 24
Ne ekzistas alia bono por la homo, krom manĝi kaj
trinki kaj igi sian animon ĝui plezuron de lia laborado;
ankaŭ pri ĉi tio mi vidis, ke ĝi estas de la mano de
Dio. 25 Ĉar kiu povas manĝi, kaj kiu povas ĝui, sen
Li? 26 Ĉar al homo, kiu agas bone antaŭ Li, Li donas
saĝon kaj scion kaj ĝojon, kaj al la pekulo Li donas la
zorgemecon amasigi kaj kolekti, por poste transdoni
al tiu, kiu agas bone antaŭ Dio; kaj ĉi tio estas vantaĵo
kaj ventaĵo.

3 Por ĉio estas sezono, kaj tempo difinita estas por
ĉiu afero sub la suno; 2 estas tempo por naskiĝi,
kaj tempo por morti; estas tempo por planti, kaj
tempo por elŝiri la plantitaĵon; 3 estas tempo por
mortigi, kaj tempo por kuraci; estas tempo por detrui,
kaj tempo por konstrui; 4 estas tempo por plori, kaj
tempo por ridi; estas tempo por ĝemi, kaj tempo por
danci; 5 estas tempo por disĵeti ŝtonojn, kaj tempo
por kolekti ŝtonojn; estas tempo por ĉirkaŭbraki, kaj
tempo por foriri de ĉirkaŭbrakado; 6 estas tempo por
serĉi, kaj tempo por perdi; estas tempo por konservi,
kaj tempo por forĵeti; 7 estas tempo por disŝiri, kaj
tempo por kunkudri; estas tempo por silenti, kaj
tempo por paroli; 8 estas tempo por ami, kaj tempo
por malami; estas tempo por milito, kaj tempo por
paco. 9 Kian profiton havas faranto de tio, kion li
laboras? 10 Mi vidis la penemecon, kiun Dio donis al
la homidoj, por ke ili turmentiĝu per ĝi. 11 Ĉion Li
kreis bela ĝiatempe; kaj scion pri la mondo Li enmetis
en ilian koron, sed tiel, ke homo ne povas kompreni la
farojn, kiujn faris Dio de la komenco ĝis la fino. 12
Mi scias, ke ekzistas nenia bono por ili, krom ĝoji kaj
fari bonon en sia vivo. 13 Kaj se homo manĝas kaj
trinkas kaj ĝuas bonon de sia tuta laborado, tio estas
dono de Dio. 14 Mi scias, ke ĉio, kion faras Dio, restas
eterne; al ĝi oni nenion povas aldoni, kaj de ĝi oni
nenion povas depreni; kaj Dio tion faris, ke oni Lin
timu. 15 Kio fariĝis, tio ekzistas de longe; kaj kio estas
fariĝonta, tio antaŭ longe jam estis, kaj Dio revokas
pasintaĵon. 16 Ankoraŭ mi vidis sub la suno: en la loko
de juĝo, ke tie estas maljusteco; en la loko de vero, ke
tie estas malico. 17 Mi diris en mia koro: Piulon kaj
malpiulon juĝos Dio; ĉar estas tempo por ĉiu afero,
kaj por ĉio, kio fariĝas tie. 18 Mi diris en mia koro: Ĉi
tio estas pri la homidoj, ke Dio ilin elprovu, kaj ke ili
vidu, ke ili estas bruto per si mem. 19 Ĉar la sorto de
homidoj kaj la sorto de bruto estas sorto egala: kiel ĉi
tiuj mortas, tiel mortas ankaŭ tiuj, kaj sama spirito
estas en ĉiuj; kaj supereco de homo kontraŭ bruto ne
ekzistas, ĉar ĉio estas vantaĵo. 20 Ĉiuj iras al unu loko:
ĉiuj fariĝis el polvo, kaj ĉiuj refariĝos polvo. 21 Kiu
scias, ĉu la spirito de homidoj leviĝas supren, kaj ĉu la
spirito de bruto malleviĝas malsupren en la teron? 22
Kaj mi ekvidis, ke ekzistas nenio pli bona, ol ke homo
ĝuu plezuron de siaj faroj, ĉar tia estas lia sorto; ĉar
kiu alkondukos lin, por vidi, kio estas post li?

4 Kaj mi returniĝis, kaj mi vidis ĉiujn premojn, kiuj
estas farataj sub la suno: kaj jen estas larmoj
de prematoj, kaj ne ekzistas por ili konsolanto; kaj
perforteco de la mano de iliaj premantoj, kaj ne
ekzistas por ili konsolanto. 2 Kaj mi trovis, ke la
mortintoj, kiuj jam antaŭ longe mortis, estas pli feliĉaj
ol la vivantoj, kiuj vivas ĝis nun; 3 kaj pli feliĉa ol ili
ambaŭ estas tiu, kiu ĝis nun ne ekzistis, kiu ne vidis la
malbonajn farojn, kiuj estas farataj sub la suno. 4 Mi
vidis ankaŭ, ke ĉia laboro kaj ĉia lerteco en la faroj
estas nur konkurado de unu kontraŭ alia; kaj ankaŭ ĉi
tio estas vantaĵo kaj ventaĵo. 5 Malsaĝulo kunmetas
siajn manojn, kaj formanĝas sian korpon. 6 Pli bona
estas plenmano da trankvilanimeco, ol ambaŭmano
da penado kaj ventaĵo. 7 Kaj denove mi turniĝis, kaj
vidis vantaĵon sub la suno: 8 jen estas solulo, kaj
neniun alian li havas; nek filon nek fraton li havas;
kaj tamen ne havas finon lia laborado, kaj lia okulo
ne povas satiĝi de riĉeco; por kiu do mi laboras kaj
senigas mian animon de ĝuado? Ĉi tio ankaŭ estas
vantaĵo kaj malbona afero. 9 Pli bone estas al du
ol al unu, ĉar ili havas bonan rekompencon por sia
laborado. 10 Ĉar se ili falos, unu levos la alian; sed ve
al solulo, se li falos, kaj se ne estas alia, kiu lin levus.
11 Ankaŭ se du kuŝiĝas, estas al ili varme; sed unu —
kiel li varmiĝos? 12 Kaj se iu montros sin pli forta
kontraŭ unu, tiam ambaŭ kontraŭstaros lin; eĉ fadeno
triopigita ne baldaŭ disŝiriĝos. 13 Pli bona estas knabo
malriĉa sed saĝa, ol reĝo maljuna sed malsaĝa, kiu
jam ne povas akiri scion. 14 Iu el malliberejo eliris, kaj
fariĝis reĝo; alia por reĝeco naskiĝis, kaj tamen estas
malriĉa. 15 Mi vidis, ke ĉiu vivanto iras sub la suno

kun la junulo: ĝi estas la alia, kiu okupos lian lokon.
16 Senfina estas la popolo, antaŭ kiu li estis, kaj tamen
la posteuloj ne ĝojos pri li; ankaŭ ĉi tio estas vantaĵo
kaj ventaĵo.

5 Gardu vian piedon, kiam vi iros en la domon
de Dio, kaj estu preta pli por aŭskultado, ol por
oferdonado de malsaĝuloj; ĉar ili ne scias, ke ili agas
malbone. 2 Ne rapidu kun via buŝo, kaj via koro ne
rapidu elparoli vorton antaŭ Dio, ĉar Dio estas en la
ĉielo, kaj vi estas sur la tero; tial malmultaj estu viaj
vortoj. 3 Ĉar sonĝo prezentiĝas per multe da agado,
kaj parolo de malsaĝulo konsistas el multe da vortoj.
4 Kiam vi faros promeson al Dio, ne prokrastu ĝin
plenumi; ĉar malagrablaj al Li estas malsaĝuloj: kion
vi promesis, tion plenumu. 5 Pli bone estas, ke vi ne
faru promeson, ol fari promeson kaj ne plenumi. 6 Ne
permesu al via buŝo pekigi vian korpon, kaj ne diru al
la sendito de Dio, ke ĝi estas eraro; kial fari, ke Dio
koleru pro via parolo, kaj ke Li detruu la faron de viaj
manoj? 7 Ĉe multo da sonĝoj kaj vantaĵoj estas ankaŭ
multe da vortoj; sed vi timu Dion. 8 Se premadon
de malriĉulo kaj rompadon de justeco kaj honesteco
vi vidas en lando, ne miru; ĉar pli alta kontrolas pli
altan, kaj plej altaj ilin kontrolas. 9 Kaj superecon en
ĉio havas tiu lando, en kiu la reĝo servas al la tero. 10
Kiu amas monon, tiu ne satiĝos per mono; kaj kiu
amas riĉecon, al tiu ĝi ne donos utilon: ankaŭ ĉi tio
estas vantaĵo. 11 Ju pli estas da havo, des pli multaj
estas ĝiaj konsumantoj; kaj kian profiton havas ĝia
mastro, krom vidi ĝin per siaj okuloj? 12 Dolĉa estas la
dormo de laboranto, ĉu li manĝas malmulte aŭ multe;
sed trosateco ne lasas la riĉulon dormi. 13 Turmentan
malbonon mi vidis sub la suno: riĉecon konservatan
por la malutilo de ĝia propra mastro. 14 Kaj pereas ĉi
tiu riĉeco en malfavoraj cirkonstancoj; naskiĝas filo,
kaj li nenion havas en la mano. 15 Kiel li eliris el la
ventro de sia patrino, tiel nuda li foriras, kiel li venis;
kaj nenion li elportas el sia laboro, kion li povus porti
en la mano. 16 Kaj ĉi tio estas turmenta doloro, ke kiel
li venis, tiel li foriras; kian do profiton li havas de tio,
ke li laboras por la vento? 17 Kaj ĉiujn siajn tagojn
li konsumis en mallumo, en multe da ekscitiĝo, en
malsano kaj malagrablaĵoj! 18 Jen, kion mi vidis: ke
estas bone kaj bele manĝi kaj trinki kaj ĝui plezurojn
de ĉiuj siaj laboroj, kiujn homo laboras sub la suno
dum la tagoj de sia vivo, kiujn donis al li Dio; ĉar tio
estas lia apartenaĵo. 19 Kaj se al iu homo Dio donis
riĉecon kaj havon, kaj donis al li la povon konsumi ilin
kaj preni sian parton kaj ĝui plezuron de siaj laboroj,
ĉi tio estas dono de Dio. 20 Ĉar ne longe li memoros la
tagojn de sia vivo; Dio donas al li ĝojon de lia koro.

6 Ekzistas malbono, kiun mi vidis sub la suno, kaj
granda ĝi estas por la homo: 2 se al iu homo Dio
donas riĉecon kaj havon kaj honoron, kaj al lia animo
mankas nenio, kion ajn li dezirus, sed Dio ne donas
al li la povon konsumi ĝin, nur fremda homo ĝin
konsumas — ĉi tio estas vantaĵo kaj malfacila doloro.
3 Se iu homo naskigus cent infanojn kaj vivus multajn
jarojn kaj atingus profundan aĝon, sed lia animo ne
ĝuus sate la havon, kaj eĉ bonan enterigon li ne havus
— tiam mi dirus: Pli feliĉa ol li estas abortito. 4 Ĉar
ĉi tiu vante venis kaj en mallumon foriris, kaj en
mallumo kaŝiĝos lia nomo. 5 Eĉ la sunon li ne vidis
kaj ne konis — al li estas pli trankvile ol al tiu. 6
Kaj se tiu homo vivus du mil jarojn kaj la bonon ne
ĝuus, ĉu ne al unu loko ĉiuj iros? 7 Ĉiuj laboroj de
homo estas por lia buŝo, kaj tamen lia animo ne estas
satigebla. 8 Kaj kian superecon havas la saĝulo antaŭ
malsaĝulo, la inteligenta malriĉulo antaŭ aliaj vivaj
estaĵoj? 9 Pli bone estas vidi per la okuloj, ol imagi
en la animo; ankaŭ ĉi tio estas vantaĵo kaj ventaĵo.
10 Kio ajn ekzistas, tio de longe havas nomon; kaj
estas sciate, kia estas la homo, kaj ke li ne povas juĝe
batali kun Tiu, kiu estas pli forta ol li. 11 Ĉar ekzistas
multe da aferoj, kiuj plimultigas la vantaĵon; kian do
superecon havas la homo? 12 Ĉar kiu scias, kio estas
bona por la homo dum la tagoj de lia vanta vivo, kiun
li pasigas kiel ombro? kaj kiu diros al la homo, kio
estos post li sub la suno?

7 Pli bona estas bona nomo, ol bona oleo; kaj la tago
de la morto estas pli bona, ol la tago de la naskiĝo.
2 Pli bone estas iri en domon de funebro, ol iri en
domon de festenado; ĉar morto estas la fino de ĉiu
homo, kaj la vivanto notos ĉi tion en sia koro. 3 Pli
bona estas plendo, ol rido; ĉar ĉe malĝojo de la vizaĝo
pliboniĝas la koro. 4 La koro de saĝuloj estas en domo
de funebro, kaj la koro de malsaĝuloj en domo de ĝojo.
5 Pli bone estas aŭskulti riproĉon de saĝulo, ol aŭskulti
kanton de malsaĝuloj. 6 Ĉar simila al la kraketado
de dornoj sub poto estas la ridado de la malsaĝuloj;
kaj vantaĵo ĝi estas. 7 Ĉar perforteco forprenas la
saĝon de saĝulo, kaj la prudenton malbonigas donaco.

8 La fino de afero estas pli bona, ol ĝia komenco;
pacienculo estas pli bona, ol malhumilulo. 9 Ne rapidu
koleri en via spirito; ĉar koleremeco loĝas en la brusto
de malsaĝuloj. 10 Ne diru: Kial la antaŭaj tagoj estis
pli bonaj, ol la nunaj? ĉar ne el saĝeco vi ĉi tion
demandus. 11 Bona estas saĝeco kune kun hereda
havo, kaj ĝi estas profita al tiuj, kiuj vidas la sunon. 12
Ĉar la saĝeco estas ŝirmo tiel same, kiel mono estas
ŝirmo; sed la supereco de scienco konsistas en tio, ke
la saĝeco donas vivon al sia posedanto. 13 Rigardu
la faron de Dio; ĉar kiu povas tion rektigi, kion Li
kurbigis? 14 En la tago de bonstato uzu la bonstaton,
kaj en la tago de malfeliĉo atendu: ĉi tion kaj tion
aranĝis Dio, por ke la homo nenion komprenu post Li.
15 Ĉion tion mi vidis en miaj vantaj tagoj: okazas, ke
virtulo pereas ĉe sia virteco, kaj okazas, ke malvirtulo
longe vivas ĉe sia malvirteco. 16 Ne estu tro virta,
kaj ne rezonu tro multe: kial vi devas vin konfuzi? 17
Ne malvirtu tro multe, kaj ne estu senprudenta: kial
vi devas morti ne en via tempo? 18 Bone estas, se vi
tenos vin je unu afero kaj ankaŭ de alia afero vi ne
forprenos vian manon; ĉar tiu, kiu timas Dion, penas
plaĉi al ĉiuj. 19 La saĝeco faras la saĝulon pli forta, ol
dek potenculoj en la urbo. 20 Ĉar ne ekzistas sur la
tero virtulo, kiu farus nur bonon kaj ne pekus. 21 Ne
ĉiujn vortojn, kiujn oni diras, atentu en via koro, por
ke vi ne aŭdu vian sklavon malbenanta vin: 22 ĉar
multajn fojojn konsciis via koro, ke ankaŭ vi malbenis
aliajn. 23 Ĉion ĉi tion mi provis per mia saĝo; mi diris
al mi: Mi akiru saĝon; tamen ĝi estas malproksima de
mi. 24 Kio estas malproksima kaj tre profunda, kiu
tion komprenos? 25 Mi turnis min kun mia koro, por
ekkoni, esplori, kaj traserĉi saĝecon kaj prudenton,
kaj ekscii, ke la malvirteco estas malsaĝeco kaj ke
la senscieco estas sensenca. 26 Kaj mi trovas, ke pli
malbona ol la morto estas la virino, kiu estas kaptilo,
kaj kies koro estas reto, kaj kies manoj estas katenoj;
tiu, kiu plaĉas al Dio, sin savos de ŝi, sed pekulo estos
kaptita de ŝi. 27 Jen, kion mi trovis, diris la Predikanto:
oni devas kunigi unu fakton kun alia, por veni al
konkludo. 28 Jen, kion ankoraŭ serĉis mia animo kaj
ne trovis: viron unu inter mil mi trovis, sed virinon
inter ĉiuj mi tute ne trovis. 29 Nur ĉi tion mi trovis, ke
Dio kreis la homon virtema; sed la homoj fordonis sin
al multaj artifikoj.

8 Kiu estas simila al saĝulo? kaj kiu komprenas la
sencon de la aferoj? Saĝeco de homo lumigas lian
vizaĝon, kaj la maldelikateco de lia vizaĝo ŝanĝiĝas. 2
Mi diras: La reĝan ordonon plenumu, pro la ĵuro farita
antaŭ Dio. 3 Ne rapidu foriri de antaŭ li, kaj ne estu
persistema en malbona afero; ĉar ĉion, kion li volos, li
povos fari. 4 Ĉar la vorto de reĝo estas potenca; kaj
kiu povas diri al li: Kion vi faras? 5 Kiu plenumas la
ordonon, tiu spertos nenion malbonan; tempon kaj
manieron de agado scias la koro de saĝulo. 6 Ĉar por
ĉiu afero estas ĝia tempo kaj ĝia maniero; kaj granda
estas por la homo la malbono de tio, 7 ke li ne scias,
kio estos; ĉar kiu diros al vi, kiel estos? 8 Neniu homo
povas regi la venton kaj reteni la venton, neniu povas
regi la tagon de la morto; ne ekzistas forpermeso en
tiu milito, kaj malvirteco ne savas sian faranton. 9
Ĉion ĉi tion mi vidis, kaj mi atentis ĉiun aferon, kiu
estas farata sub la suno, kaj tiun tempon, en kiu homo
regas homon al lia malbono. 10 Kaj ankaŭ mi vidis, ke
oni enterigis malvirtulojn, kiuj venadis kaj eliradis
el la sankta loko, kaj kiuj estis forgesitaj en la urbo,
kie ili tiel agis; kaj ĉi tio ankaŭ estas vantaĵo. 11 Ĉar
ne baldaŭ estas farata juĝo kontraŭ malbonaj faroj,
tial plene kuraĝas la koro de homidoj fari malbonon.
12 Kvankam pekulo faras malbonon cent fojojn, kaj
Dio estas pacienca al li, tamen mi scias, ke estos bone
al tiuj, kiuj timas Dion, kiuj respektas Lin. 13 Kaj
ne estos bone al malvirtulo, kaj ne tenos sin longe,
simile al ombro, tiu, kiu ne timas Dion. 14 Ekzistas
vantaĵo, kiu fariĝas sur la tero: ekzistas virtuloj, al
kiuj fariĝas tio sama, kio fariĝas al malvirtuloj; kaj
ekzistas malvirtuloj, al kiuj fariĝas tio sama, kio al
la virtuloj; kaj mi diris al mi, ke ankaŭ ĉi tio estas
vantaĵo. 15 Kaj mi eklaŭdis la gajecon, ĉar ne ekzistas
io pli bona por homo sub la suno, ol manĝi, trinki, kaj
gaji, kaj ke ĉi tio akompanu lin en liaj laboroj en la
tagoj de lia vivo, kiujn donis al li Dio sub la suno. 16
Kiam mi direktis mian koron, por ekkoni saĝecon, kaj
por ĉirkaŭrigardi la aferojn, kiuj estas farataj sur la
tero tiamaniere, ke nek tage nek nokte homo vidas
dormon sur siaj okuloj; kaj kiam mi rigardis ĉiujn
farojn de Dio: 17 tiam mi trovis, ke homo ne povas
kompreni la aferojn, kiuj fariĝas sub la suno; kiom
ajn la homo penus esplori, li ne komprenos; kaj se eĉ
saĝulo diras, ke li scias, li tamen ne povas kompreni.

9 Al ĉio ĉi tio mi direktis mian koron, por esplori
ĉion ĉi tion, ke la virtuloj kaj saĝuloj kaj iliaj faroj
estas en la mano de Dio; kaj nek amon nek malamon
scias la homo, kaj nenion, kio lin atendas. 2 Al ĉiuj
estas la sama sorto: al la virtulo kaj al la malvirtulo, al
la bona kaj pura kaj al la malpura, al la oferfaranto
kaj al tiu, kiu ne oferfaras, al la bonulo kaj al la
pekulo, al la ĵuranto kaj al tiu, kiu timas ĵuron. 3
Ĉi tio estas malbona en ĉio, kio fariĝas sub la suno,
ke la sama sorto ekzistas por ĉiuj, kaj la koro de la
homidoj estas plena de malbono, kaj sensencaĵo estas
en ilia koro dum ilia vivado, kaj poste ili transiras al
la mortintoj. 4 Ĉar kiu troviĝas inter la vivuloj, tiu
havas ankoraŭ esperon; ĉar eĉ al hundo vivanta estas
pli bone, ol al leono mortinta. 5 Ĉar la vivantoj scias,
ke ili mortos; kaj la mortintoj scias nenion, kaj por ili
jam ne ekzistas rekompenco, ĉar la memoro pri ili
estas forgesita. 6 Kaj ilia amo, kaj ilia malamo, kaj ilia
ĵaluzo jam de longe malaperis; kaj jam por neniam ili
havas partoprenon en io, kio fariĝas sub la suno. 7 Iru,
manĝu ĝoje vian panon, kaj trinku kun gaja koro vian
vinon, se Dio favoris viajn aferojn. 8 En ĉiu tempo viaj
vestoj estu blankaj, kaj oleo ne manku sur via kapo. 9
Ĝuu la vivon kun la edzino, kiun vi amas en la tempo
de via tuta vanta vivo, kaj kiun Dio donis al vi por ĉiuj
viaj vantaj tagoj; ĉar ĉi tio estas via apartenaĵo en
via vivo, kaj en viaj laboroj, kiujn vi laboris sub la
suno. 10 Kion ajn via mano povas fari laŭ via forto,
tion faru; ĉar ekzistas nek faro, nek kalkulo, nek scio,
nek saĝo, en Ŝeol, kien vi iros. **(Sheol h7585)** 11 Aliflanke
mi vidis sub la suno, ke ne de la rapiduloj dependas
la kuro, ne de la fortuloj dependas la milito, kaj ne
la saĝuloj havas panon, kaj ne la talentuloj havas
riĉecon, kaj ne la kompetentuloj trovas aprobon;
nur de la tempo kaj okazo ili ĉiuj dependas. 12 Ĉar
eĉ ne scias la homo sian sorton; kiel fiŝoj, kaptitaj
en pereigan reton, kaj kiel birdoj, implikiĝintaj en
kaptilon, tiel kaptiĝas la homoj en tempo malbona,
kiam ĝi atakas ilin neatendite. 13 Ankaŭ jenan saĝaĵon
mi vidis sub la suno, kaj ĝi ŝajnis al mi granda: 14
estis urbo malgranda, kaj malmulte da homoj ĝi havis;
venis al ĝi granda reĝo, kaj sieĝis ĝin, kaj konstruis
ĉirkaŭ ĝi grandajn sieĝajn fortikaĵojn; 15 sed troviĝis
en ĝi homo malriĉa sed saĝa, kaj li savis la urbon per
sia saĝeco; tamen neniu rememoris tiun malriĉan
homon. 16 Kaj mi diris: Pli bona estas saĝo ol forto,
tamen la saĝo de malriĉulo estas malrespektata, kaj
liaj vortoj ne estas aŭdataj. 17 La vortoj de saĝuloj,
trankvile aŭskultitaj, estas pli bonaj ol la kriado de
reganto inter malsaĝuloj. 18 Pli bona estas saĝo, ol
militaj instrumentoj; kaj unu pekulo pereigas multe
da bono.

10 Venenaj muŝoj putrigas kaj haladzigas la oleon
de parfumisto; pli ŝatata ol saĝo kaj honoro
ofte estas malgranda malsaĝaĵo. 2 La koro de saĝulo
estas ĉe lia dekstra flanko, kaj la koro de malsaĝulo
ĉe lia maldekstra. 3 Kaj eĉ en la vojo, laŭ kiu iras
malsaĝulo, mankas al li saĝo, kaj al ĉiu li diras, ke li
estas malsaĝulo. 4 Se atakos vin kolero de reganto,
ne forlasu vian lokon, ĉar mildeco pardonigas eĉ
grandajn krimojn. 5 Ekzistas malbono, kiun mi vidis
sub la suno; ĝi estas kvazaŭ eraro, venanta de la
reganto: 6 senscieco estas metata tre alte, kaj la
riĉuloj sidas malalte. 7 Mi vidis sklavojn sur ĉevaloj,
kaj princojn, irantajn piede, kiel sklavoj. 8 Kiu fosas
kavon, tiu falos en ĝin; kaj kiu detruas muron, tiun
mordos serpento. 9 Kiu transmovas ŝtonojn, tiu faras
al si difekton per streĉo; kaj kiu hakas lignon, tiu
sin vundas per ĝi. 10 Se malakriĝis la hakilo, kaj
oni ne akrigas la tranĉan flankon, oni devas streĉi
la fortojn; kaj la ĉefaĵo estas prepari ĉion saĝe. 11
Se mordis la serpento sen kuracparolo, tiam jam ne
utilas kuracparolanto. 12 Vortoj el buŝo de saĝulo
estas agrablaj, sed la buŝo de malsaĝulo lin mem
pereigas. 13 La komenco de la parolo de lia buŝo estas
malsaĝaĵo, kaj la fino de lia parolo estas abomeninda
sensencaĵo. 14 Malsaĝulo multe parolas, kvankam
homo ne scias, kio estos; kaj kio estos post li? kiu ĉi
tion diros al li? 15 Penado de malsaĝuloj lacigas ĉiun,
kiu ne scias eĉ la vojon al la urbo. 16 Ve al vi, ho lando,
se via reĝo estas infano kaj viaj princoj manĝas frue!
17 Feliĉa vi estas, ho lando, se via reĝo estas de nobla
deveno kaj viaj princoj manĝas en ĝusta tempo, por
fortiĝi, ne por festeni! 18 De mallaboremeco falos la
plafono; kaj, se oni mallevas la manojn, tramalsekiĝas
la domo. 19 Por plezuro oni aranĝas festenojn, kaj
vino gajigas la vivon, kaj mono respondas por ĉio.
20 Eĉ en viaj pensoj ne malbenu la reĝon, kaj en via
dormoĉambro ne malbenu riĉulon; ĉar birdo ĉiela
transportos vian voĉon, kaj flugila estaĵo eldiros vian
parolon.

11 Elsendu vian panon sur la akvon; ĉar post longa
tempo vi ĝin retrovos. 2 Donu parton al sep, kaj

eĉ al ok, ĉar vi ne scias, ĉu ne estos malfeliĉo sur la
tero. 3 Kiam la nuboj pleniĝos, ili verŝos pluvon sur la
teron, kaj se falos arbo suden aŭ norden, ĝi tie restos,
kien ĝi falis. 4 Kiu observas la venton, tiu ne semos;
kaj kiu rigardas la nubojn, tiu ne rikoltos. 5 Kiel vi
ne scias, kian vojon iros la vento, kaj kiel formiĝas
la ostoj en la ventro de gravedulino, tiel vi ne povas
scii la faron de Dio, kiu ĉion faras. 6 Matene semu
vian semon, kaj vespere via mano ne ripozu; ĉar vi
ne scias, ĉu tio aŭ alio estos pli ĝusta, aŭ ĉu ambaŭ
egale estos bonaj. 7 Agrabla estas la lumo, kaj bone
estas al la okuloj vidi la sunon. 8 Ĉar se eĉ multajn
jarojn homo vivus, li ĝoju en ili ĉiuj; kaj li memoru
pri la tagoj mallumaj, ĉar estos multe da ili; ĉio, kio
venos, estas vantaĵo. 9 Ĝoju, junulo, en via infaneco;
kaj via koro ĝuu plezuron en la tagoj de via juneco,
kaj iru, kien kondukas vin via koro kaj kien rigardas
viaj okuloj; sed sciu, ke pri ĉio ĉi tio Dio venigos vin al
juĝo. 10 Tial forpelu malĝojon de via koro, kaj forigu
malagrablaĵon de via korpo; ĉar la infaneco kaj la
juneco estas vantaĵo.

12 Kaj memoru vian Kreinton en la tagoj de via
juneco, dum ankoraŭ ne venis la tagoj de
malbono, kaj ne venis la jaroj, pri kiuj vi diros: Mi ne
havas plezuron de ili; 2 dum ne mallumiĝis la suno, la
lumo, la luno, kaj la steloj, kaj ne revenis nuboj post la
pluvo; 3 en la tago, kiam ektremos la gardantoj de la
domo, kaj malfortiĝos la militantoj, kaj ĉesos mueli la
muelantinoj, ĉar estos malmulte da ili, kaj senvidiĝos
la rigardantinoj tra la fenestroj; 4 kaj fermitaj estos la
pordoj al la strato, kiam eksilentos la sonado de la
muelŝtono; kaj homo leviĝados laŭ la krio de birdo,
kaj mallaŭtiĝos la sonoj de kantoj; 5 kaj altaĵojn ili
ektimos, kaj sur la vojo aperos teruroj, kaj ekfloros
la migdalarbo, kaj peziĝos la lokusto, kaj malaperos
deziro: tiam homo foriros en sian eternan domon,
kaj sur la strato marŝos plorantoj; 6 ĝis disŝiriĝos la
arĝenta ĉeneto, rompiĝos la ora lampeto, rompiĝos
la kruĉo ĉe la fonto, kaj falos la rado en la puton; 7
kaj la polvo refariĝos tero, kiel ĝi estis, kaj la spirito
reiros al Dio, kiu ĝin donis. 8 Vantaĵo de vantaĵoj,
diris la Predikanto; ĉio estas vantaĵo. 9 Krom tio, ke
la Predikanto estis saĝulo, li ankoraŭ instruis scion
al la popolo; li ĉion pesis, esploris, kaj verkis multe
da sentencoj. 10 Penis la Predikanto trovi agrablajn
parolojn, kaj li skribis ĝuste vortojn de vero. 11 La
paroloj de saĝuloj estas kiel akraj pintoj, kaj kiel
enbatitaj najloj estas la vortoj de publikaj parolistoj;
ili estas donitaj de unu paŝtisto. 12 Kaj krom tio, mia
filo, akceptu mian instruon, ke se oni volus verki
multajn librojn, ne estus fino, kaj multe legi lacigas la
korpon. 13 Ni aŭskultu la finon de ĉio: timu Dion, kaj
plenumu Liajn ordonojn, ĉar ĉi tio estas ĉio por la
homo. 14 Ĉar ĉiun faron Dio venigos al juĝo, eĉ ĉion
kaŝitan, ĉu ĝi estas bona aŭ malbona.

# Alt Kanto

**1** Alta kanto de Salomono. 2 Ho, li kisu min per kisoj
de sia buŝo! Ĉar via amo estas pli bona, ol vino. 3
Ho, kiel bonodoras viaj aromaĵoj! Via nomo similas
al elverŝita oleo; Tial la fraŭlinoj amas vin. 4 Altiru
min; ni postkuros vin. La reĝo envenigu min en siajn
ĉambrojn; Ho, ni ĝojos kaj gajiĝos kun vi; Ni memoros
vian amon pli, ol vinon; Sincere oni amas vin. 5 Mi
estas nigra, tamen beleta, Ho filinoj de Jerusalem,
Kiel la tendoj de Kedar, Kiel la tapetoj de Salomono.
6 Ne rigardu min, ke mi estas nigreta: La suno min
brulkolorigis. La filoj de mia patrino koleris kontraŭ
mi; Ili faris min gardistino de la vinberĝardenoj;
Mian propran vinberĝardenon mi ne gardis. 7 Diru
al mi, ho vi, kiun mia animo amas, Kie vi paŝtas, kie
vi ripozigas vian brutaron tagmeze: Kial mi similu
al vagistino Ĉe la brutaroj de viaj kamaradoj? 8 Se
vi ne scias tion, ho belulino inter virinoj, Sekvu la
paŝojn de la ŝafaro, Kaj paŝtu viajn kapridojn ĉe la
tendoj de la paŝtistoj. 9 Al la ĉevalino en la ĉaroj de
Faraono Mi komparas vin, ho mia amatino. 10 Belaj
estas viaj vangoj sub la orelringoj, Via kolo sub la
laĉoj de perloj. 11 Orajn orelringojn ni faros al vi,
Kun arĝentaj enkrustaĵoj. 12 Dum la reĝo sidas ĉe
la festotablo, Mia nardo bonodoras. 13 Kiel fasko de
mirho, restanta inter miaj mamoj, Estas al mi mia
amato. 14 Kiel floraro de kofero estas por mi mia
amato, En la vinberĝardenoj de En-Gedi. 15 Ho, vi
estas bela, mia amatino; ho, vi estas ja bela; Viaj okuloj
estas kiel ĉe kolomboj. 16 Ho, vi estas bela, mia amato,
kaj ĉarma; Nia lito estas kiel freŝaj herboj; 17 La traboj
de nia domo estas cedraj, Niaj ĉevronoj estas abiaj.

**2** Mi estas la lilio de Ŝaron, La rozo de la valoj. 2 Kiel
rozo inter la dornoj, Tiel estas mia amatino inter
la knabinoj. 3 Kiel pomarbo inter arboj nefruktaj,
Tiel estas mia amato inter la junuloj. Mi sopiris al lia
ombro, jen mi sidiĝis; Kaj liaj fruktoj estas bongustaj al
mia palato. 4 Li enkonduku min en vindomon, Kaj lia
standardo super mi estu la amo. 5 Plifortigu min per
vinberkuko, Refreŝigu min per pomsuko; Ĉar mi estas
malsana de amo. 6 Lia maldekstra mano estu sub mia
kapo, Lia dekstra ĉirkaŭprenu min. 7 Mi ĵurligas vin,
ho filinoj de Jerusalem, Je la gazeloj aŭ la cervoj de la
kampo: Ne veku nek sendormigu la amatinon, Ĝis ŝi
mem volos. 8 Ho, jen estas la voĉo de mia amato! Ho,
jen li venas, Rapidante sur la montoj, saltante sur la
altaĵoj. 9 Mia amato similas al gazelo aŭ al cervo. Ho,
jen li staras post nia muro, Rigardante tra la fenestro,
Sin montrante ĉe la krado. 10 Mia amato vokas, li
parolas al mi: Leviĝu, mia amatino, mia belulino, ho
venu; 11 Ĉar la vintro jam forpasis, La pluvo pasis
kaj malaperis; 12 La floroj jam estas sur la tero; La
kantosezono jam alvenis, Kaj la voĉo de la turto jam
aŭdiĝas en nia lando; 13 La figarbo jam maturigas siajn
fruktetojn, La vinbertrunkoj siajn vinberetojn, Kiuj
jam bonodoras. Leviĝu, mia amatino, mia belulino,
kaj venu. 14 Ho mia kolombino, en la krevaĵoj de la
roko, en la kaŝejo de la rokkrutaĵo, Montru al mi vian
aspekton, aŭdigu al mi vian voĉon; Ĉar via voĉo estas
dolĉa, kaj via aspekto estas bela. 15 Kaptu al ni la
ŝakalojn, la malgrandajn ŝakalojn, La detruantojn de la
vinberĝardenoj, Kiam niaj vinberĝardenoj burĝonas.
16 Mia amato apartenas al mi, Kaj mi apartenas al li,
Kiu paŝtas inter la rozoj. 17 Ĝis la tago malvarmetiĝos
kaj la ombroj forkuros, Turnu vin, ho amato, similiĝu
al gazelo aŭ al cervo Sur la montoj de aromaĵoj.

**3** Sur mia kuŝejo dum la nokto mi serĉis tiun, kiun
mia animo amas; Mi serĉis lin, sed mi lin ne trovis.
2 Mi leviĝos, kaj irados tra la urbo; Sur la stratoj kaj
placoj mi serĉos tiun, kiun mia animo amas; Mi serĉis
lin, sed mi lin ne trovis. 3 La gardistoj, kiuj iradas tra
la urbo, renkontis min, Al ili mi demandis: Ĉu vi vidis
tiun, kiun mia animo amas? 4 Kiam mi nur ekforiris
de ili, Mi renkontis tiun, kiun mia animo amas; Mi
tenis lin, kaj ne delasis lin, Ĝis mi enkondukis lin en la
domon de mia patrino, Kaj en la ĉambron de ŝi, kiu
naskis min. 5 Mi ĵurligas vin, ho filinoj de Jerusalem,
Je la gazeloj aŭ cervoj de la kampo: Ne veku nek
sendormigu la amatinon, Ĝis ŝi mem volos. 6 Kiu
estas ŝi, kiu venas el la dezerto, kiel kolono de fumo
Parfumita per mirho kaj olibano, Per ĉiaj pudroj de la
parfumisto? 7 Jen estas la lito de Salomono! Sesdek
fortuloj ĉirkaŭas ĝin El la fortuloj de Izrael, 8 Ĉiuj
tenantaj glavojn, kompetentaj batalantoj; Ĉiu portas
sian glavon ĉe sia femuro, Pro la teruro de la nokto. 9
Edziĝan liton el la ligno de Lebanon Konstruis al si
la reĝo Salomono. 10 Ĝiajn kolonojn li konstruis el
arĝento, La ĉarpentaĵon el oro, la tegaĵon el purpuro;
La interno estas pavimita per la amo de la filinoj de
Jerusalem. 11 Iru tien, ho filinoj de Cion, kaj vidu la
reĝon Salomono, Vestitan per la krono, per kiu lia

patrino kronis lin en la tago de lia edziĝofesto, En la tago de la ĝojo de lia koro.

**4** Vi estas bela, mia amatino, vi estas bela; Viaj okuloj estas kolombaj, malantaŭ via vualo. Viaj haroj estas kiel aro da kaprinoj, Deirantaj sur la deklivo de la monto Gilead. **2** Viaj dentoj estas kiel tondotaj ŝafinoj, Kiuj elvenas el la lavejo; Ĉiuj estas en paroj, Kaj ne mankas eĉ unu el ili. **3** Viaj lipoj estas kiel ruĝa fadeno, Kaj via elparolado estas bela; Kiel peco de granato, viaj vangoj aspektas Malantaŭ via vualo. **4** Via kolo estas kiel la turo de David, kiu estas konstruita kiel armiltenejo; Mil ŝildoj pendas sur ĝi, Ĉiuj ŝildoj de la potenculoj. **5** Viaj du mamoj estas kiel du cervidoj, ĝemeloj de gazelino, Kiuj sin paŝtas inter la rozoj. **6** Ĝis la tago malvarmetiĝos kaj la ombroj forkuros, Mi foriros al la monto de mirho kaj al la altaĵo de olibano. **7** Via tutaĵo estas bela, mia amatino; Vi ne havas difekton. **8** Kun mi el Lebanon venu, ho mia fianĉino, Kun mi el Lebanon; Rigardu malsupren de la pinto de Amana, De la pinto de Senir kaj Ĥermon, El la kavernoj de la leonoj, De la montoj de la leopardoj. **9** Vi kortuŝis min, mia fratino, mia fianĉino; Vi kortuŝis min per unu ekrigardo de viaj okuloj, Per unu ĉeno de sur via kolo. **10** Kiel bela estas via amo, mia fratino, mia fianĉino! Ho, kiom pli bona estas via amo, ol vino! Kaj la bonodoro de viaj parfumaĵoj estas pli bona, ol ĉiaj aromaĵoj! **11** Mielo gutadas el viaj lipoj, ho mia fianĉino; Mielo kaj lakto kuŝas sub via lango; Kaj la bonodoro de viaj vestoj estas kiel la bonodoro de Lebanon. **12** Vi estas ĝardeno ŝlosita, ho mia fratino, mia fianĉino; Vi estas fonto ŝlosita, puto sigelita. **13** Viaj kreskaĵoj estas paradizo de granatoj kun multevaloraj fruktoj, Plena de koferoj kaj nardoj; **14** Nardo kaj safrano; Kano kaj cinamo, kun ĉiuspecaj olibanarboj; Mirho kaj aloo kaj la plej delikataj aromaĵoj; **15** Ĝardenfonto, puto de vivanta akvo, Kaj riveretoj elfluantaj el Lebanon. **16** Vekiĝu, ho norda vento, venu, ho suda vento; Trablovu mian ĝardenon, ke ĝiaj aromaĵoj elfluu. Venu mia amato en sian ĝardenon Kaj manĝu ĝiajn multevalorajn fruktojn.

**5** Mi venis en mian ĝardenon, mia fratino, mia fianĉino; Mi deŝiris mian mirhon kaj miajn aromaĵojn; Mi manĝis mian mielĉelaron, kiel ankaŭ mian mielon; Mi trinkis mian vinon, kiel ankaŭ mian lakton. Manĝu, ho miaj kamaradoj; Drinku kaj ebriiĝu, ho miaj amikoj. **2** Mi dormis, sed mia koro estis maldorma; Jen estas la voĉo de mia amato, jen li ekfrapas: Malfermu al mi, ho mia fratino, mia amatino, mia kolombino, mia virtulino; Ĉar mia kapo estas plena de roso, Miaj harbukloj de la gutoj de la nokto. **3** Mi jam demetis mian ĥitonon; kial mi ĝin denove surmetu? Mi jam lavis miajn piedojn; kial mi ilin malpurigu? **4** Mia amato etendis sian manon tra la truo, Kaj mia interno kompatis lin. **5** Mi leviĝis, por malfermi al mia amato; Kaj de miaj manoj gutis mirho, Kaj miaj fingroj estis malsekaj de mirha fluidaĵo, Sur la riglilo de la seruro. **6** Mi malfermis al mia amato; Sed mia amato forturniĝis kaj malaperis. Mia animo tremis, dum li parolis; Mi lin serĉis, sed mi lin ne trovis; Mi vokis lin, sed li ne respondis al mi. **7** La gardistoj, kiuj ĉirkaŭas la urbon, renkontis min, Ili batis kaj vundis min; La gardistoj de la muroj deprenis de mi la kovrotukon. **8** Mi ĵurligas vin, ho filinoj de Jerusalem, se vi renkontos mian amaton, Ho, kion vi diros al li? ke mi estas malsana de amo. **9** Per kio diferencas via amato de aliaj amatoj, Ho belulino inter virinoj? Per kio diferencas via amato de aliaj amatoj, Ke vi tiele ĵurligas nin? **10** Mia amato estas blanka kaj ruĝa, Distinginda inter dekmilo. **11** Lia kapo estas pura oro; Liaj haroj estas buklitaj, nigraj kiel korvo; **12** Liaj okuloj estas kiel kolomboj ĉe la akvotorentoj; Lavitaj per lakto, orname enkadrigitaj; **13** Liaj vangoj estas kiel bedoj de aromaĵoj, kiel kesto de ŝmiraĵisto; Liaj lipoj estas kiel rozoj, ili gutadas fluidan mirhon; **14** Liaj manoj estas kiel oraj ringoj, kadritaj per topazoj; Lia korpo estas ebura, enkrustita per safiroj; **15** Liaj kruroj estas kiel marmoraj kolonoj, enfiksitaj en bazoj el pura oro; Lia aspekto estas kiel Lebanon, majesta kiel cedroj; **16** Lia palato estas dolĉaĵoj; lia tutaĵo estas tre aminda. Tia estas mia amato, kaj tia estas mia kamarado, Ho filinoj de Jerusalem.

**6** Kien foriris via amato, Ho belulino inter virinoj? Kien forturniĝis via amato, Por ke ni lin serĉu kun vi? **2** Mia amato iris en sian ĝardenon, al la bedoj de aromaĵoj, Por paŝti en la ĝardenoj kaj kolekti rozojn. **3** Mi apartenas al mia amato, kaj mia amato apartenas al mi; Tiu, kiu paŝtas inter la rozoj. **4** Ho, mia amatino, vi estas bela kiel Tirca, Agrabla kiel Jerusalem, Terura kiel batalantaj taĉmentoj. **5** Forturnu la okulojn for de mi, Ĉar ili venkas min. Viaj haroj estas kiel aro da kaprinoj, Deirantaj sur la deklivo de la monto Gilead.

6 Viaj dentoj estas kiel aro da ŝafinoj, Kiuj elvenas el la
lavejo; Ĉiuj estas en paroj, Kaj ne mankas eĉ unu el ili.
7 Kiel peco de granato, viaj vangoj aspektas Malantaŭ
via vualo. 8 Da reĝinoj ekzistas sesdek, kaj okdeko da
kromvirinoj, Kaj la junulinoj estas sennombraj. 9 Sed
unu sola estas mia kolombino, mia virtulino; Ŝi estas
la sola ĉe sia patrino, La elektita de sia naskintino; La
filinoj vidis ŝin, kaj nomas ŝin feliĉulino; La reĝinoj kaj
la kromvirinoj laŭdas ŝin, dirante: 10 Kiu estas ŝi, kiu
aspektas kiel la matenruĝo, Bela kiel la luno, Hela kiel
la suno, Terura kiel batalantaj taĉmentoj? 11 Mi iris
en la nuksarban ĝardenon, Por trarigardi la verdajn
kreskaĵojn de la valo, Por vidi, ĉu la vinbertrunko
burĝonas, ĉu la granatarboj floras. 12 Tiam mi ankoraŭ
ne sciis, Ke mia animo elektos min por la ĉaroj de
la nobeloj de mia popolo. 13 Turniĝu, turniĝu, ho
Ŝulamit; Turniĝu, turniĝu, ke ni rigardu vin. Kial
vi volas rigardi Ŝulamiton tiel, Kiel oni rigardas la
dancadon de la taĉmentoj?

7 Kiel belaj estas viaj paŝoj en sandaloj, ho filino
de princo! La svingado de viaj femuroj estas kiel
ĉenringoj, Majstre ellaboritaj. 2 Via umbiliko estas kiel
ronda pokalo, Al kiu trinkaĵo ne mankas; Via ventro
estas kiel amaso da tritiko ĉirkaŭita de rozoj; 3 Viaj
du mamoj estas kiel du cervidoj, Ĝemeloj de gazelino;
4 Via kolo estas kiel turo el eburo; Viaj okuloj kiel
la lagetoj en Ĥeŝbon, ĉe la pordego de Bat-Rabim;
Via nazo estas kiel la turo de Lebanon rigardanta
Damaskon; 5 Via kapo sur vi estas kiel Karmel, Kaj
la harbukloj de via kapo kiel la purpura robo de la
reĝo, falde kunligita. 6 Kiel bela kaj kiel ĉarma estas
mia amatino inter la plezuroj! 7 Via staturo similas la
palmotrunkon, Kaj viaj mamoj la vinberarojn. 8 Mi
diris: Mi suprengrimpos la palmotrunkon kaj teniĝos
je ĝiaj branĉoj; Kaj viaj mamoj estu kiel la penikoj
de la vinbertrunko, Kaj la bonodoro de via nazo
kiel la bonodoro de citronoj; 9 Kaj via palato kiel
vino bongusta, Kiu englitiĝas ĉarmege kaj glate, Kiu
paroligas la lipojn de la dormantoj. 10 Mi apartenas
al mia amato, Kaj li sin tiras al mi. 11 Venu, mia
amato, ni eliru sur la kamparon; Ni enloĝiĝu en la
vilaĝoj. 12 Frumatene ni iru al la vinberĝardenoj; Ni
rigardu, ĉu la vinbertrunko jam burĝonis, Ĉu ĝiaj
floroj jam malfermiĝis, Ĉu la granatarboj jam floras;
Tie mi donos al vi mian amon. 13 La mandragoroj
jam bonodoras, Kaj apud nia enirejo troviĝas delikataj
fruktoj ĉiuspecaj, fruaj kaj malfruaj, Kiujn mi provizis
por vi, ho mia amato!

8 Ho, se vi estus al mi kiel frato, Kiu suĉis la mamojn
de mia patrino! Se mi renkontus vin ekstere, mi
kisus vin; Kaj tamen neniu malestimus min. 2 Mi
gvidus vin, mi enkondukus vin en la domon de mia
patrino; Vi instruus min, Kaj mi trinkigus al vi la
spicitan vinon kaj la granatsukon. 3 Lia maldekstra
mano estu sub mia kapo, Kaj lia dekstra ĉirkaŭprenu
min! 4 Mi ĵurligas vin, ho filinoj de Jerusalem, Ne
veku nek sendormigu la amatinon, Ĝis ŝi mem volos.
5 Kiu estas ŝi, kiu venas el la dezerto, Sin apogante sur
sia amato? Sub la pomarbo mi vekis vin; Tie, kie via
patrino vin naskis, Kie vin naskis via naskintino. 6
Konservu min kiel sigelon en via koro, kiel sigelon
sur via brako; Ĉar la amo estas forta kiel la morto;
La ĵaluzo estas nefleksebla kiel Ŝeol; Ĝiaj brulaĵoj
estas brulaĵoj de fajro, La flamo de la Eternulo. **(Sheol
h7585)** 7 Granda akvo ne povas estingi la amon, Kaj
riveroj ne povas superakvi ĝin; Se homo proponus
doni la tutan havaĵon de sia domo por la amo, Oni
malestime lin forpuŝus. 8 Nia fratino ankoraŭ estas
malgranda, Kaj mamojn ŝi ankoraŭ ne havas; Kion
ni faros al nia fratino, Kiam oni svatos ŝin? 9 Se ŝi
estos muro, ni konstruos sur ŝi arĝentan palacon;
Kaj se ŝi estos pordo, ni ĉirkaŭbaros ŝin per traboj el
cedro. 10 Mi estas muro, kaj miaj mamoj kiel turoj; Mi
jam estis al li kiel iu, kiu trovis favoron. 11 Salomono
posedis vinberĝardenon en Baal-Hamon; Li luigis la
vinberĝardenon al gardistoj; Ĉiu devas alporti milon
da arĝentaj moneroj pro ĝiaj fruktoj. 12 Mia propra
vinberĝardeno estas antaŭ mi. La milon al vi, ho
Salomono, Kaj ducent al la gardistoj de ĝiaj fruktoj. 13
Ho vi, loĝantino de la ĝardenoj, La kamaradoj volas
aŭskulti vian voĉon; Al mi ĝin aŭdigu. 14 Forkuru, ho
mia amato, Kaj similiĝu al gazelo aŭ al cervo Sur la
montoj de aromaĵoj.

# Jesaja

**1** Vizio de Jesaja, filo de Amoc, kiun li vidis pri Judujo
kaj Jerusalem, en la tempo de Uzija, Jotam, Aĥaz,
kaj Ĥizkija, reĝoj de Judujo. **2** Aŭskultu, ho ĉielo, kaj
atentu, ho tero, ĉar parolas la Eternulo: Filojn Mi
edukis kaj altigis, kaj ili perfidis Min. **3** Bovo konas
sian aĉetinton, kaj azeno la manĝujon de sia mastro;
sed Izrael ne konas, Mia popolo ne komprenas. **4** Ve al
la popolo peka, al la gento ŝarĝita de malbonagoj,
al la idaro krima, al la filoj pereuloj! ili forlasis la
Eternulon, ili malŝatis la Sanktulon de Izrael, ili
forturniĝis malantaŭen. **5** Kion oni ankoraŭ batu en
vi, kiuj daŭrigas sian defaladon? la tuta kapo estas
malsana, kaj la tuta koro estas senforta. **6** De la plando
de la piedo ĝis la kapo estas en ĝi nenio sendifekta,
nur vundoj kaj tuberoj kaj ulceroj pusaj, kiuj ne estas
purigitaj, nek ĉirkaŭligitaj, nek moligitaj per oleo. **7**
Via lando estas dezerta, viaj urboj estas forbruligitaj
per fajro, vian kampon antaŭ vi formanĝas fremduloj,
kaj dezerta ĝi estas, kiel ruinigita de fremduloj. **8** Kaj
restis la filino de Cion kiel tendo en vinberĝardeno,
kiel budo sur kukumkampo, kiel urbo sieĝata. **9**
Se la Eternulo Cebaot ne lasus al ni restaĵon, ni
fariĝus preskaŭ kiel Sodom, ni similiĝus al Gomora. **10**
Aŭskultu la vortojn de la Eternulo, estroj de Sodom;
atentu la instruon de nia Dio, popolo de Gomora! **11**
Por kio Mi bezonas vian multegon da buĉoferoj? diras
la Eternulo; Mi trosatiĝis de la bruloferoj de ŝafoj
kaj de la sebo de grasigitaj brutoj, kaj la sangon de
bovoj kaj ŝafidoj kaj kaproj Mi ne deziras. **12** Kiam
vi venas, por aperi antaŭ Mia vizaĝo, kiu postulas
tion de viaj manoj, ke vi paŝu sur Mian korton? **13** Ne
plu alportu hipokritajn donacojn; la incensado estas
abomenindaĵo por Mi; monatkomencon, sabaton, kaj
kunvokon de kunvenoj Mi ne toleras — krimo kaj
sankta kunveno! **14** Viajn monatkomencojn kaj festojn
Mia animo malamas; ili fariĝis por Mi ŝarĝo, tedis al
Mi porti ilin. **15** Kiam vi etendas viajn manojn, Mi
kaŝas antaŭ vi Miajn okulojn; eĉ kiam vi multe preĝas,
Mi ne aŭskultas; viaj manoj estas plenaj de sango.
**16** Lavu vin, purigu vin; forigu la malbonon de viaj
faroj antaŭ Miaj okuloj, ĉesu malbonagi. **17** Lernu agi
bone, celu justecon, helpu prematon, havigu juston
al orfo, defendu aferon de vidvino. **18** Venu, kaj ni
faru inter ni juĝan disputon, diras la Eternulo: se viaj
pekoj estas sangoruĝaj, ili fariĝos blankaj kiel neĝo;
kaj se ili estas kiel skarlato, ili fariĝos kiel lano. **19** Se
vi estos humilaj kaj obeemaj, vi manĝos la bonaĵon
de la tero; **20** sed se vi rifuzos kaj ribelos, glavo vin
ekstermos; ĉar tiel diris la buŝo de la Eternulo. **21**
Kiamaniere la fidela urbo fariĝis malĉastulino! ĝi estis
plena de justeco, virto en ĝi loĝis, sed nun mortigistoj.
**22** Via arĝento fariĝis skorio, via vino miksiĝis kun
akvo. **23** Viaj estroj estas perfiduloj, kaj kolegoj de
ŝtelistoj; ili ĉiuj amas donacojn kaj ĉasas profiton;
al orfo ili ne donas juston, kaj la juĝa plendo de
vidvino ne atingas ilin. **24** Pro tio diras la Sinjoro, la
Eternulo Cebaot, la Potenculo de Izrael: Ho ve, Mi
konsolos Min sur Miaj kontraŭuloj, kaj Mi venĝos al
Miaj malamikoj. **25** Kaj Mi remetos Mian manon sur
vin, kaj Mi forte purigos vian skorion, kaj Mi eligos
vian tutan stanon. **26** Kaj Mi restarigos viajn juĝistojn,
kiel antaŭe, kaj viajn konsilistojn, kiel en la komenco;
post tio oni nomos vin urbo de virto, civito fidela. **27**
Cion elaĉetiĝos per justeco, kaj ĝiaj revenintoj per
virto. **28** La krimuloj kaj pekuloj pereos kune, kaj la
forlasintoj de la Eternulo ekstermiĝos. **29** Ĉar ili estos
malhonoritaj pro la terebintarboj, kiujn vi amis, kaj vi
estos hontigitaj pro la ĝardenoj, kiujn vi elektis. **30**
Ĉar vi estos kiel terebintarbo, kies folioj velkis, kaj
kiel ĝardeno, kiu ne havas akvon. **31** Kaj la fortulo
fariĝos kiel stupo, kaj lia laboro kiel fajrero; kaj ambaŭ
brulos, kaj neniu estingos.

**2** Afero, kiun Jesaja, filo de Amoc, vidis vizie pri
Judujo kaj Jerusalem. **2** Iam en la tempo estonta la
monto de la domo de la Eternulo staros kiel ĉefo inter
la montoj, kaj ĝi estos pli alta ol ĉiuj altaĵoj; kaj fluos
al ĝi ĉiuj nacioj. **3** Kaj iros multaj popoloj, kaj diros:
Venu, ni iru supren sur la monton de la Eternulo, al la
domo de la Dio de Jakob, por ke Li instruu nin pri
Siaj vojoj, kaj ni iru laŭ Lia irejo; ĉar el Cion eliros la
instruo, kaj la vorto de la Eternulo el Jerusalem. **4**
Kaj Li juĝos inter la nacioj, kaj Li decidos pri multaj
popoloj; kaj ili forĝos el siaj glavoj plugilojn kaj el
siaj lancoj rikoltilojn; ne levos nacio glavon kontraŭ
nacion, kaj oni ne plu lernos militon. **5** Ho domo de
Jakob, venu, kaj ni iru en la lumo de la Eternulo. **6** Sed
Vi forlasis Vian popolon, la domon de Jakob, ĉar ili
pli pleniĝis ol antaŭe kaj ili sorĉas kiel la Filiŝtoj kaj
aliĝis al infanoj de aligentuloj. **7** Kaj ilia lando pleniĝis
de arĝento kaj oro, kaj senfinaj estas iliaj trezoroj;
kaj ilia lando pleniĝis de ĉevaloj, kaj sennombraj

estas iliaj ĉaroj. 8 Kaj ilia lando pleniĝis de idoloj; ili
adorkliniĝas al la faritaĵo de siaj manoj, al tio, kion
faris iliaj fingroj. 9 Kaj kliniĝis la homo, kaj malaltiĝis
la viro; kaj Vi ne pardonos ilin. 10 Eniru en rokon
kaj kaŝu vin en la tero, pro timo antaŭ la Eternulo
kaj antaŭ la majesto de Lia grandeco. 11 La fieraj
okuloj de homo malleviĝos, kaj la altaj homoj estos
malaltigitaj; nur la Eternulo sola estos alta en tiu tago.
12 Ĉar la tago de la Eternulo Cebaot estos super ĉio
malhumila kaj alta kaj super ĉio aroganta, kiu estos
malaltigita; 13 kaj super ĉiuj cedroj de Lebanon, la
altaj kaj malhumilaj, kaj super ĉiuj kverkoj de Baŝan;
14 kaj super ĉiuj altaj montoj, kaj super ĉiuj leviĝintaj
montetoj; 15 kaj super ĉiu alta turo, kaj super ĉiu
fortikigita muro; 16 kaj super ĉiuj ŝipoj de Tarŝiŝ, kaj
super ĉiuj belaspektaĵoj. 17 Kaj humiligita estos la
fiereco de homo, kaj altaj homoj estos malaltigitaj;
nur la Eternulo sola estos alta en tiu tago. 18 La idoloj
estos tute neniigitaj. 19 Kaj oni iros en la kavernojn
de la rokoj kaj en la fendojn de la tero, pro timo antaŭ
la Eternulo kaj antaŭ Lia majesta grandeco, kiam Li
leviĝos, por ĵeti teruron sur la teron. 20 En tiu tago la
homo ĵetos al la talpoj kaj vespertoj siajn arĝentajn
kaj orajn idolojn, kiujn li faris al si por adorado; 21
por eniri en kavernojn de rokoj kaj en fendojn de
ŝtonegoj, pro timo antaŭ la Eternulo kaj antaŭ Lia
majesta grandeco, kiam Li leviĝos, por ĵeti teruron
sur la teron. 22 Ĉesu zorgi pri homo, kies animo estas
en liaj nazotruoj; ĉar kion li valoras?

**3** Ĉar jen la Sinjoro, la Eternulo Cebaot, forprenos de
Jerusalem kaj de Judujo la apogon kaj forton, ĉian
apogon de pano kaj ĉian apogon de akvo; 2 heroon
kaj militiston, juĝiston kaj profeton, aŭguriston
kaj plejaĝulon, 3 kvindekestron kaj eminentulon,
konsiliston, majstron, kaj lertan sorĉiston. 4 Kaj
junulojn Mi faros iliaj estroj, kaj petoluloj regos
ilin. 5 Kaj premos la popolo ĉiu la alian kaj ĉiu
sian proksimulon; junulo estos aroganta kontraŭ
maljunulo, kaj senvalorulo antaŭ eminentulo. 6 Homo
ekkaptos sian fraton en la domo de sia patro, dirante:
Vi havas veston, estu do nia estro, kaj ĉi tiu ruino estu
sub via mano. 7 Sed ĉi tiu laŭte protestos, dirante:
Mi ne volas esti kuracanto; nek panon nek veston mi
havas en mia domo; ne faru min estro de la popolo. 8
Ĉar malfortiĝis Jerusalem, kaj Judujo falis; ĉar iliaj
paroloj kaj iliaj faroj estas kontraŭ la Eternulo kaj
ofendas la okulojn de Lia majesto. 9 La signoj de iliaj
vizaĝoj atestis kontraŭ ili, kaj sian pekon, simile al la
Sodomanoj, ili proklamas, ne kaŝas. Ve al iliaj animoj!
ĉar ili mem repagis al si malbonon. 10 Parolu pri la
justulo, ke estas bone al li; ĉar ili manĝas la fruktojn de
siaj faroj. 11 Ve al la malbona malvirtulo! ĉar la faroj
de liaj manoj estos repagitaj al li. 12 Mian popolon
premas infanoj, kaj virinoj regas ĝin. Mia popolo! viaj
gvidantoj erarigas vin kaj ruinigas la vojon de via
irado. 13 La Eternulo stariĝis, por juĝi; Li staras, por
juĝi popolojn. 14 La Eternulo faros juĝan proceson
kontraŭ la plejaĝuloj de Lia popolo kaj kontraŭ ĝiaj
estroj: Vi ruinigis la vinberĝardenon; havo, kiun vi
rabis de malriĉuloj, estas en viaj domoj. 15 Kial vi
premas Mian popolon kaj ofendas la malriĉulojn?
diras la Sinjoro, la Eternulo Cebaot. 16 Kaj la Eternulo
diras: Pro tio, ke la filinoj de Cion fieriĝis, kaj iras
kun etendita kolo kaj kun malmodesta rigardo, iras
kaj koketas, kaj tintas per ĉenetoj sur la piedoj: 17
la Sinjoro senharigos la verton de la filinoj de Cion,
kaj la Eternulo nudigos ilian hontindaĵon. 18 En tiu
tago la Sinjoro forigos la ornamon de la ĉenetoj
kaj la steletojn kaj la lunetojn, 19 la orelringojn,
la ĉenetojn kaj la ĉirkaŭligojn, 20 la brilaĵetojn kaj
la bukojn kaj la laĉojn kaj la parfumujojn kaj la
talismanojn, 21 la ringojn kaj la nazringojn, 22 la
multekostajn vestojn kaj la mantelojn kaj la vualojn
kaj la saketojn, 23 la spegulojn kaj la delikatajn ŝtofojn
kaj la kapornamojn kaj la kaptukojn. 24 Kaj anstataŭ
bonodoro estos malbonodoro, kaj anstataŭ zono estos
ŝnuro, kaj anstataŭ krispaj haroj estos kalvo, kaj
anstataŭ eleganta mantelo estos sako, anstataŭ beleco
estos brulmakuloj. 25 Viaj viroj falos de glavo, kaj viaj
fortuloj en la milito. 26 Kaj ĝiaj pordegoj ploros kaj
funebros, kaj mizere ĝi sidos sur la tero.

**4** En tiu tago ekkaptos sep virinoj unu viron, kaj
diros: Ni manĝados nian panon, kaj ni portados
niajn vestojn; nur permesu al ni porti vian nomon,
forigu de ni nian malhonoron. 2 En tiu tago la markoto
de la Eternulo estos belo kaj honoro, kaj la frukto de
la tero estos majesto kaj ornamo por la savitaĵo de
Izrael. 3 Kaj la restintoj en Cion kaj la reteniĝintoj
en Jerusalem estos nomataj sanktuloj, ĉiuj, al kiuj
la sorto lasis vivon en Jerusalem, 4 se la Sinjoro
forlavos la malpuraĵon de la filinoj de Cion, kaj forigos
el Jerusalem la sangon, kiu estas interne de ĝi, per

la spirito de juĝo kaj per la spirito de fajro. 5 Kaj
super ĉiu loko de la monto Cion kaj super ĉiuj ĝiaj
kunvenejoj la Eternulo kreos nubon kaj fumon por la
tago kaj flamon de brulanta fajro por la nokto; super
ĉio honora estos ŝirmo. 6 Kaj estos tendo, por ombri
kontraŭ la varmegeco de la tago, kaj por rifuĝigi kaj
ŝirmi kontraŭ malbona vetero kaj pluvo.

5 Mi kantos al mia amato la kanton de mia amiko
pri lia vinberĝardeno. Vinberĝardenon havis mia
amiko sur grasa altaĵo; 2 kaj li ĉirkaŭfosis ĝin,
senŝtonigis ĝin, kaj plantis en ĝi plej bonspecajn
vinberbranĉojn; kaj li konstruis turon meze de ĝi, kaj
ankaŭ vinpremejon li elhakis en ĝi; kaj li esperis, ke
ĝi donos bonajn vinberojn, sed ĝi donis senvalorajn
berojn. 3 Nun, ho loĝantoj de Jerusalem kaj Judujo, juĝu
do inter mi kaj mia vinberĝardeno. 4 Kion oni povas
ankoraŭ fari al mia vinberĝardeno, kion mi ne faris
por ĝi? kial mi esperis, ke ĝi donos bonajn vinberojn,
kaj ĝi tamen donis berojn senvalorajn? 5 Nun mi
sciigos al vi, kion mi faros al mia vinberĝardeno:
forigita estos ĝia barilo, kaj ĝi estos ruinigata, ĝiaj
muroj estos disĵetitaj, kaj ĝi estos piedpremata. 6 Mi
lasos ĝin dezerta, ĝi ne estos pritranĉata nek prifosata,
kaj elkreskos en ĝi dornoj kaj pikarbustoj; kaj al la
nuboj mi ordonos, ke ili ne verŝu sur ĝin pluvon.
7 La vinberĝardeno de la Eternulo Cebaot estas la
domo de Izrael, kaj la viroj de Jehuda estas Lia plej
amata plantaĵo; kaj Li esperis justecon, sed montriĝis
malnoblaĵo — bonagojn, sed montriĝis kriindaĵo. 8 Ve
al vi, kiuj aligas domon al domo, kampon al kampo, ĝis
restas jam nenia loko, por ke vi solaj posedu la landon!
9 En miaj oreloj estas la vortoj de la Eternulo Cebaot:
Multaj domoj fariĝos dezertaj, grandaj kaj bonaj estos
sen loĝantoj. 10 Ĉar dek parceloj da vinberĝardeno
donos nur unu bat'on, kaj ĥomero da semoj donos
nur unu efon. 11 Ve al tiuj, kiuj leviĝas frue matene,
por fordoni sin al drinkado, sidas malfrue nokte, por
varmegigi sin per vino! 12 Harpo, psaltero, tamburino,
fluto, kaj vino estas en iliaj festenoj; sed la verkon de
la Eternulo ili ne rigardas, kaj la faron de Liaj manoj
ili ne vidas. 13 Tial mia popolo estas forkondukita en
malliberecon pro nekomprenado, kaj ĝiaj eminentuloj
konsumiĝis de malsato, kaj ĝia popolamaso senfortiĝis
de soifo. 14 Pro tio Ŝeol larĝigis sian internon kaj
eksterordinare malfermis sian faŭkon; kaj malleviĝos
tien ĝia gloro kaj ĝia amaso kaj ĝia bruantaro kaj ĝia
gajularo. (Sheol h7585) 15 Kliniĝos homo kaj malaltiĝos
viro, kaj la okuloj de fieruloj humiliĝos. 16 Sed la
Eternulo Cebaot altiĝos en la juĝo, kaj la sankta Dio
estos sankta en la justeco. 17 Tiam la ŝafidoj paŝtiĝos
en bona ordo, kaj fremduloj manĝos tion, kio restos
de la fortuloj. 18 Ve al tiuj, kiuj altiras malbonagon
per ŝnuroj de vanteco kaj pekon kvazaŭ per ĉenoj de
ĉaroj; 19 al tiuj, kiuj diras: Li rapidu, Li akcelu Sian
faron, por ke ni vidu; la plano de la Sanktulo de Izrael
alproksimiĝu kaj venu, por ke ni ĝin ekkonu! 20 Ve
al tiuj, kiuj la malbonon nomas bono kaj la bonon
malbono, kiuj mallumon faras lumo kaj la lumon
mallumo, kiuj maldolĉon faras dolĉo kaj la dolĉon
maldolĉo! 21 Ve al tiuj, kiuj estas saĝuloj en siaj okuloj
kaj antaŭ si mem estas kompetentuloj! 22 Ve al tiuj,
kiuj estas herooj, por trinki vinon, kaj bravuloj, por
miksi ebriigaĵon, 23 kiuj pravigas malvirtulon pro
subaĉeto, kaj de pravulo forprenas lian pravecon! 24
Pro tio, kiel la lango de fajro formanĝas pajlon kaj la
flamo ekstermas fojnon, tiel ilia radiko fariĝos nutraĵo,
kaj ilia floro suprenflugos kiel polvo; ĉar ili malŝatis la
instruon de la Eternulo Cebaot, kaj la vortojn de la
Sanktulo de Izrael ili malestimis. 25 Pro tio ekflamis
la kolero de la Eternulo kontraŭ Lia popolo, kaj Li
etendis Sian manon kontraŭ ĝin kaj frapis ĝin; kaj
ektremis la montoj, kaj la kadavroj de la popolo estas
kiel koto sur la stratoj; kaj malgraŭ ĉio ĉi tio Lia kolero
ne kvietiĝis, kaj Lia brako estas ankoraŭ etendita. 26
Kaj Li levos signon por la popoloj malproksimaj, kaj
alvokos tian popolon de la ekstremaĵo de la tero, kaj
ĝi venos rapide kaj facile. 27 Ne estos en tiu popolo
laculo nek senfortulo, ĝi ne dormos nek dormetos, ne
deliberiĝos la zono de ĝia lumbo, kaj ne disŝiriĝos
rimeno de ĝia ŝuo. 28 Ĝiaj sagoj estas akraj, kaj ĉiuj ĝiaj
pafarkoj estas streĉitaj; la hufoj de ĝiaj ĉevaloj estas
kiel granito, kaj la radoj de ĝiaj ĉaroj kiel ventego.
29 Ĝia blekado estas simila al la leona; ĝi krias, kiel
leonidoj; ĝi ekbruas, kaj ekkaptas la rabakiron kaj
forportas, kaj neniu savas. 30 Kaj ĝi blekegos super
li en tiu tago simile al la bruo de la maro; kiam oni
rigardos la teron, tie estos mallumo kaj mizero, kaj la
lumo malaperos el la ĉielo.

6 En la jaro de la morto de la reĝo Uzija mi vidis la
Sinjoron, sidantan sur alta kaj levita trono, kaj Liaj
baskoj plenigis la templon. 2 Serafoj staris supre de Li;
ĉiu havis po ses flugiloj; per du li kovris sian vizaĝon,

per du li kovris siajn piedojn, kaj per du li flugis. 3 Kaj
unu vokadis al alia, kaj diris: Sankta, sankta, sankta
estas la Eternulo Cebaot, la tuta tero estas plena de
Lia gloro. 4 Ekŝanceliĝis de la vokanta voĉo la kolonoj
de la pordo, kaj la domo pleniĝis de fumo. 5 Kaj mi
diris: Ve al mi! ĉar mi pereis; ĉar mi estas homo kun
malpura buŝo, kaj mi loĝas inter popolo malpurbuŝa,
kaj la Reĝon, la Eternulon Cebaot, vidis miaj okuloj. 6
Tiam alflugis al mi unu el la serafoj, havante en la
mano ardantan karbon, kiun li per prenilo prenis de
la altaro, 7 kaj li ektuŝis mian buŝon, kaj diris: Jen ĉi
tio ektuŝis vian buŝon, kaj foriĝis via malpieco, kaj
via peko estas pardonita. 8 Kaj mi ekaŭdis la voĉon
de la Sinjoro, kiu diris: Kiun Mi sendos, kaj kiu iros
por ni? Kaj mi diris: Jen mi estas, sendu min. 9 Tiam
Li diris: Iru kaj diru al tiu popolo: Vi aŭdos, sed ne
komprenos; vi vidos, sed ne rimarkos. 10 Sensentigu
la koron de tiu popolo, kaj ĝiajn orelojn surdigu, kaj
ĝiajn okulojn blindigu, por ke ĝi ne vidu per siaj
okuloj, kaj por ke ĝi ne aŭdu per siaj oreloj, por ke ĝi
ne komprenu per sia koro, por ke ĝi ne konvertiĝu kaj
ne saniĝu. 11 Mi diris: Ĝis kiam, ho Sinjoro? Kaj Li
respondis: Ĝis malpleniĝos la urboj pro nehavado de
loĝantoj kaj la domoj pro nehavado de homoj, kaj ĝis
la tero tute dezertiĝos. 12 Kaj la Eternulo forigos la
homojn, kaj granda estos la forlasiteco en la lando. 13
Se restos en ĝi dekono, ĝi ankaŭ ekstermiĝos, sed kiel
terebintarbo aŭ kverko, de kiuj post la dehako restas
ankoraŭ radiko; sankta semo estos ĝia radiko.

7 En la tempo de Aĥaz, filo de Jotam, filo de Uzija,
reĝo de Judujo, eliris Recin, reĝo de Sirio, kaj Pekaĥ,
filo de Remalja, reĝo de Izrael, kontraŭ Jerusalemon,
por militi kontraŭ ĝi; sed ili ne povis konkeri ĝin. 2
Oni raportis al la domo de David, dirante: La Sirianoj
stariĝis tendare en la lando de Efraim. Tiam ektremis
lia koro kaj la koro de lia popolo, kiel la arboj de
arbaro tremas de vento. 3 Sed la Eternulo diris al
Jesaja: Iru renkonte al Aĥaz, vi kaj via filo Ŝear-
Jaŝub, al la fino de la akvotubo de la supra lageto,
ĉe la vojo al la kampo de fulistoj, 4 kaj diru al li:
Gardu vin, kaj estu trankvila; ne timu, kaj via koro
ne senkuraĝiĝu pro la du fumantaj brulŝtipoj, pro
la furiozo de Recin kun la Sirianoj kaj de la filo de
Remalja. 5 La Sirianoj, kun Efraim kaj kun la filo de
Remalja, havas malbonan intencon kontraŭ vi, kaj
diras: 6 Ni iru kontraŭ Judujon, ni malgrandigu ĝin,
malkovru ĝin por ni, kaj ni starigu kiel reĝon super ĝi
la filon de Tabeel. 7 Tiele diris la Sinjoro, la Eternulo:
Tio ne plenumiĝos, kaj tio ne estos. 8 Ĉar la kapo de
Sirio estas Damasko, kaj la kapo de Damasko estas
Recin, kaj post sesdek kvin jaroj Efraim ĉesos esti
popolo. 9 Kaj la kapo de Efraim estas Samario, kaj
la kapo de Samario estas la filo de Remalja. Se vi ne
kredas, vi ne estas fidelaj. 10 Kaj plue diris la Eternulo:
Diru al Aĥaz jene: 11 Petu por vi signon de la Eternulo,
via Dio, ĉu profunde malsupre, ĉu alte supre. (Sheol
h7585) 12 Sed Aĥaz diris: Mi ne petos, kaj mi ne incitos
la Eternulon. 13 Kaj li diris: Aŭskultu, domo de David:
ĉu ne sufiĉas al vi ĉagreni homojn, ke vi ĉagrenas eĉ
mian Dion? 14 Tial la Sinjoro mem donos al vi signon:
jen virgulino gravediĝis, kaj ŝi naskos filon, kaj ŝi
donos al li la nomon Emanuel. 15 Buteron kaj mielon
li manĝos, ĝis li povoscios forpuŝi malbonon kaj elekti
bonon. 16 Sed antaŭ ol la knabo povoscios forpuŝi
malbonon kaj elekti bonon, estos forlasita tiu lando,
kiun vi timas pro ĝiaj du reĝoj. 17 La Eternulo venigos
sur vin kaj sur vian popolon kaj sur la domon de via
patro tiajn tagojn, kiuj ne venis de post la tempo,
kiam Efraim defalis de Jehuda; Li venigos la reĝon de
Asirio. 18 En tiu tago la Eternulo alvokos la muŝojn
de la randoj de la lagoj de Egiptujo kaj la abelojn de
la lando Asiria; 19 kaj ili venos kaj sidiĝos ĉiuj en
la dezertigitaj valoj kaj en la fendoj de la rokoj kaj
sur ĉiuj arbustoj kaj sur ĉiuj pikarbetaĵoj. 20 En tiu
tempo la Eternulo razos per dungita razilo, per la
transriveranoj, per la reĝo de Asirio, la kapon kaj la
harojn de la piedoj, kaj forigos eĉ la barbon. 21 En
tiu tempo homo nutros junan bovinon kaj du ŝafojn;
22 kaj pro la abundo de lakto li manĝos buteron; ĉar
buteron kaj lakton manĝos ĉiu, kiu restos en la lando.
23 En tiu tempo ĉiu loko, kie estis mil vinberbranĉoj,
havantaj la prezon de mil arĝentaj moneroj, kovriĝos
per dornoj kaj pikarbustoj. 24 Kun sagoj kaj pafarkoj
oni venos tien, ĉar la tuta lando kovriĝos per dornoj
kaj pikarbustoj. 25 Kaj sur ĉiujn montojn, kiujn oni
prilaboradis per pioĉoj, oni ne povos supreniri pro
timo antaŭ la dornoj kaj pikarbustoj; oni sendos tien
bovojn, oni irigos tien ŝafojn.

8 Kaj la Eternulo diris al mi: Prenu al vi grandan
skribtabulon, kaj skribu sur ĝi per homa skribilo:
Rapidu akiri, baldaŭ rabado. 2 Kaj mi prenis al mi du
fidindajn atestantojn: la pastron Urija, kaj Zeĥarjan,

filon de Jebereĥja. 3 Kaj mi iris al la profetino, kaj ŝi
gravediĝis kaj naskis filon. Kaj la Eternulo diris al mi:
Donu al li la nomon: Rapidu-Akiri-Baldaŭ-Rabado. 4
Ĉar antaŭ ol la knabo povoscios voki: Mia patro, kaj
Mia patrino, la riĉaĵon de Damasko kaj la rabakiron de
Samario oni portos antaŭ la reĝo de Asirio. 5 Kaj plue
la Eternulo parolis al mi, dirante: 6 Pro tio, ke ĉi tiu
popolo malŝatis la akvon de Ŝiloaĥ, kiu fluas kviete,
kaj ĝojas pro Recin kaj pro la filo de Remalja: 7 pro tio
la Sinjoro jen venigos sur ilin la akvon de la Rivero,
la forta kaj granda, la reĝon de Asirio kaj lian tutan
gloron; kaj ĝi leviĝos super ĉiujn siajn kuŝujojn kaj
iros super ĉiujn siajn bordojn. 8 Kaj ĝi enpenetros en
Judujon, inundos, leviĝos, kaj atingos ĝis la kolo; kaj ĝi
etendos siajn flugilojn kaj plenigos vian tutan landon,
ho Emanuel. 9 Koleru, ho popoloj, tamen vi ektimos;
atentu, vi ĉiuj en la malproksimaj landoj; armu vin,
sed vi ektimos; armu vin, sed vi ektimos. 10 Pripensu
entreprenon, sed ĝi neniiĝos; parolu vortojn, sed ili
ne plenumiĝos, ĉar kun ni estas Dio. 11 Ĉar tiel diris
al mi la Eternulo, tenante la manon sur mi, kaj Li
instruis al mi, ke mi ne iru la vojon de tiu popolo,
kaj Li diris: 12 Ne nomu konspiro ĉion tion, kion tiu
popolo nomas konspiro; kaj tion, kion ĝi timas, ne
timu, kaj tio vin ne teruru. 13 La Eternulo Cebaot
estu por vi sankta; Lin vi timu, kaj Li estu por vi
terura. 14 Li estos sanktaĵo kaj ŝtono de falpuŝiĝo kaj
roko de alfrapiĝo por la du domoj de Izrael, kaptilo
kaj falilo por la loĝantoj de Jerusalem. 15 Kaj multaj
falpuŝiĝos, kaj falos kaj rompiĝos, kaj enretiĝos kaj
kaptiĝos. 16 Ligu la ateston, sigelu la leĝon ĉe Miaj
lernantoj. 17 Kaj mi atendas la Eternulon, kiu kaŝis
Sian vizaĝon antaŭ la domo de Jakob, kaj mi esperas
al Li. 18 Jen, mi kaj la infanoj, kiujn la Eternulo donis
al mi, estas kiel signoj kaj atentigiloj en Izrael de la
Eternulo Cebaot, kiu loĝas sur la monto Cion. 19 Kaj
se oni diros al vi: Demandu la antaŭdiristojn kaj la
sorĉistojn, la flustristojn kaj la murmuretistojn, ĉar
popolo ja demandas sian Dion, per la mortintoj por
la vivantoj: 20 tiam al la instruo kaj al la atesto! se
ili ne diros konforme al tio, ili ne havos matenan
ĉielruĝon. 21 Ili irados sur ĝi premataj kaj malsataj;
kaj kiam ili estos malsataj, ili koleros kaj insultos sian
reĝon kaj sian Dion, kaj rigardos supren. 22 Kaj la
teron ili rigardos, kaj ili vidos mizeron kaj mallumon,
premantan mallumon, kaj en la mallumon ili estos
puŝataj.

9 Sed ne restos la mallumo super tiuj, kiuj estas
premataj: kiel la antaŭa tempo humiligis la landon
de Zebulun kaj la landon de Naftali, la sekvonta tempo
glorigos la apudmaran vojon, la transan flankon de
Jordan, la Galileon de la nacioj. 2 Popolo, kiu iris
en mallumo, ekvidis grandan lumon; super homoj,
sidantaj en lando de morta ombro, ekbrilis lumo. 3
Vi multigis la popolon, Vi grandigis ĝian ĝojon; ili
ĝojas antaŭ Vi, kiel oni ĝojas dum la rikolto, kiel oni
ĝojas ĉe dividado de rabakiro. 4 Ĉar la jugon de ilia
ŝarĝo, la kanon de ilia ŝultro, kaj la bastonon de ilia
premanto Vi rompis, kiel en la tempo de Midjan.
5 Ĉar ĉiu armaĵo de tiuj, kiuj sin brue armis, kaj
la vestoj, kiuj ruliĝis en sango, estos forbruligitaj,
ekstermitaj per fajro. 6 Ĉar infano naskiĝis al ni, filo
estas donita al ni, kaj la regado estos sur lia ŝultro,
kaj lia nomo estos: Mirinda, Konsilisto, Potenculo,
Patro de Eterneco, Princo de Paco; 7 por pligrandigi
la regadon kaj por paco senfina sur la trono de David
kaj en lia regno, por fortikigi ĝin kaj fortigi ĝin per
justeco kaj vero de nun ĝis eterne. La fervoro de
la Eternulo Cebaot tion faros. 8 Vorton sendis la
Sinjoro al Jakob, kaj ĝi falis en Izrael. 9 Tion sciu la
tuta popolo, Efraim kaj la loĝantoj de Samario, kiuj
diras kun fiereco kaj kun malhumila koro: 10 Brikoj
falis, sed el hakitaj ŝtonoj ni konstruos; sikomoroj
estas dishakitaj, sed ni anstataŭigos ilin per cedroj.
11 La Eternulo fortigos kontraŭ ili la malamikojn
de Recin, kaj liajn kontraŭulojn Li ekscitos, 12 la
Sirianojn de antaŭe kaj la Filiŝtojn de malantaŭe;
kaj ili formanĝos Izraelon per la tuta buŝo. Malgraŭ
ĉio ĉi tio ne kvietiĝis Lia kolero, kaj Lia brako estas
ankoraŭ etendita. 13 Sed la popolo ne turnas sin
al Tiu, kiu ĝin batas, kaj la Eternulon Cebaot ili ne
serĉas. 14 Tial la Eternulo dehakos ĉe Izrael la kapon
kaj la voston, branĉon kaj kanon, en unu tago. 15
Maljunulo kaj eminentulo estas la kapo; kaj profeto,
kiu instruas malveraĵon, estas la vosto. 16 La gvidantoj
de tiu popolo erarigas, kaj la gvidatoj pereos. 17 Tial la
Sinjoro ne ĝojos pro iliaj junuloj, kaj iliajn orfojn kaj
vidvinojn Li ne kompatos; ĉar ĉiuj estas hipokrituloj
kaj malbonaguloj, kaj ĉiu buŝo parolas malnoblaĵon.
Malgraŭ ĉio ĉi tio ne kvietiĝis Lia kolero, kaj Lia brako
estas ankoraŭ etendita. 18 Ĉar la malbonageco ekbrulis
kiel fajro, dornojn kaj pikarbustojn ĝi formanĝas, ĝi
brulas en densejo de arbaro, kaj leviĝas kolonoj da
fumo. 19 De la kolero de la Eternulo Cebaot ekbrulis

la tero, kaj la popolo fariĝis manĝaĵo por la fajro;
neniu kompatas sian fraton. 20 Oni tranĉas dekstre kaj
restas malsataj, oni manĝas maldekstre kaj ne satiĝas;
ĉiu manĝas la karnon de sia brako. 21 Manase estas
kontraŭ Efraim, kaj Efraim kontraŭ Manase, ambaŭ
kune kontraŭ Jehuda. Malgraŭ ĉio ĉi tio Lia kolero ne
kvietiĝis, kaj Lia brako estas ankoraŭ etendita.

10 Ve al la leĝdonantoj, kiuj starigas maljustajn
leĝojn, kaj al tiuj, kiuj skribas maljustajn
verdiktojn, 2 por forpuŝi malriĉulojn de la leĝo kaj
forrabi la justecon de senhavuloj de Mia popolo, por
ke la vidvinoj fariĝu ilia rabakiro, kaj por prirabi la
orfojn! 3 Sed kion vi faros en la tago de puno kaj de
pereo, kiu venos de malproksime? al kiu vi kuros, por
serĉi helpon? kaj kie vi lasos vian honoron, 4 por ne
fleksiĝi inter la kaptitoj kaj ne fali inter la mortigitoj?
Malgraŭ ĉio ĉi tio Lia kolero ne kvietiĝis, kaj Lia brako
estas ankoraŭ etendita. 5 Ve al la Asiriano, la vergo
de Mia kolero! la bastono en iliaj manoj estas Mia
indigno. 6 Kontraŭ popolon hipokritan Mi lin sendos,
kaj pri la popolo de Mia kolero Mi donos al li ordonon,
ke li prenu militakiron, ke li rabu rabaĵon, kaj ke
li piedpremu ĝin kiel koton sur la stratoj. 7 Sed li
ne tiel tion komprenas, kaj lia koro ne tiel intencas;
li intencas ekstermi kaj dispremi ne malmulte da
popoloj; 8 ĉar li diras: Ĉu miaj princoj ĉiuj ne estas
reĝoj? 9 Ĉu Kalno ne estas kiel Karkemiŝ? ĉu Ĥamat ne
estas kiel Arpad? ĉu Samario ne estas kiel Damasko?
10 Ĉar mia mano trafis la regnojn idolistajn, kies idoloj
estas pli multaj ol en Jerusalem kaj en Samario, 11 tial,
kiel mi agis kun Samario kaj ĝiaj idoloj, tiel mi agos
kun Jerusalem kaj ĝiaj idoloj. 12 Sed kiam la Sinjoro
plenumos Sian tutan faron sur la monto Cion kaj en
Jerusalem, Mi rememoros la frukton de la malhumila
reĝo de Asirio kaj la majeston de liaj arogantaj okuloj;
13 ĉar li diris: Mi tion faris per la forto de mia mano
kaj per mia saĝeco, ĉar mi estas saĝa; mi forigis la
limojn de la popoloj, rabis iliajn provizojn, kaj mi
deĵetis kiel potenculo la sidantojn; 14 kaj mia mano
trovis la riĉaĵon de la popoloj kiel neston; kaj kiel oni
enkolektas forlasitajn ovojn, mi enkolektis la tutan
teron; kaj neniu movis flugilon, malfermis la buŝon,
nek krietis. 15 Ĉu povas hakilo fanfaroni antaŭ tiu,
kiu hakas per ĝi? ĉu povas segilo fieri antaŭ tiu, kiu
ĝin tiras? kvazaŭ vergo svingus tiun, kiu ĝin levas!
kvazaŭ bastono levus tiun, kiu ne estas el ligno! 16 Tial
la Sinjoro, la Eternulo Cebaot, venigos malgrasecon
sur liajn grasulojn, kaj sub lia gloro ekbrulos fajro,
kiel flamo. 17 Kaj la lumo de Izrael fariĝos fajro,
kaj lia Sanktulo fariĝos flamo; kaj ĝi forbruligos kaj
ekstermos liajn pikarbustojn kaj dornojn en unu tago,
18 kaj ekstermos la majeston de lia arbaro kaj de lia
fruktoĝardeno, de la animo ĝis la karno; kaj li fariĝos
kiel senfortigita kadukulo. 19 La restaĵo de la arboj de
lia arbaro estos malgrandnombra, kaj knabo povos
ilin registri. 20 En tiu tago la restintoj de Izrael kaj la
savitoj de la domo de Jakob ne plu fidos sian batanton,
sed fidos fidele la Eternulon, la Sanktulon de Izrael.
21 Konvertiĝos la restintoj, la restintoj de Jakob, al la
Dio potenca. 22 Ĉar se via popolo, ho Izrael, eĉ estos
kiel la apudmara sablo, nur la restintoj konvertiĝos;
ĉar estas decidita ekstermo per inunda justeco. 23 Ĉar
deciditan ekstermon la Sinjoro, la Eternulo Cebaot,
faros en la tuta lando. 24 Tial tiele diras la Sinjoro,
la Eternulo Cebaot: Ne timu la Asirianon, ho Mia
popolo, kiu loĝas en Cion; per vergo li vin frapos, kaj
sian bastonon li levos kontraŭ vin, kiel la Egiptoj;
25 ĉar ankoraŭ tre malmulte daŭros, kaj finiĝos la
kolero kaj Mia furiozo pro iliaj malbonagoj; 26 kaj la
Eternulo Cebaot aperigos vipon super li, kiel Li frapis
la Midjanidojn ĉe la roko Oreb kaj kiel Lia bastono
estis super la maro, kaj Li levos ĝin, kiel kontraŭ la
Egiptojn. 27 Kaj en tiu tago lia ŝarĝo estos deprenita
de sur viaj ŝultroj kaj lia jugo de sur via kolo, kaj
la jugo krevos pro la graseco. 28 Li venas Ajaton,
trapasas Migronon, revizias siajn armilojn en Miĥmaŝ;
29 ili trapasis la pasejon, tradormas la nokton en Geba;
Rama tremas, Gibea de Saul forkuras. 30 Kriu laŭte,
filino de Galim! atentu, Laiŝ! ho malriĉa Anatot! 31
Madmena cedas, la loĝantoj de Gebim forkuras. 32
Jam hodiaŭ li restos en Nob; li etendas sian manon
kontraŭ la monton de la filino de Cion, kontraŭ la
monteton de Jerusalem. 33 Jen la Sinjoro, la Eternulo
Cebaot, kun forto dehakos branĉojn; la alte leviĝintaj
estos dehakitaj, kaj la fieraj estos humiligitaj. 34 Kaj Li
pereigos la densajn partojn de la arbaro per fero, kaj
Lebanon falos de la Potenculo.

11 Eliros markoto el la trunko de Jiŝaj, kaj branĉo
elkreskos el ĝiaj radikoj. 2 Kaj estos sur li la
spirito de la Eternulo, spirito de saĝo kaj prudento,
sprito de konsilo kaj forto, spirito de sciado kaj de
timo antaŭ la Eternulo. 3 Kaj agrabla estos al li la timo

antaŭ la Eternulo; kaj ne laŭ la rigardo de siaj okuloj
li juĝados, ne laŭ la aŭdo de siaj oreloj li eldirados
verdiktojn; 4 sed li juĝados malriĉulojn laŭ vero, kaj
laŭ justeco li eldirados verdiktojn por humiluloj de la
lando; kaj li frapos la teron per la vergo de sia buŝo, kaj
per la spiro de siaj lipoj li mortigos malpiulon. 5 Vero
estos la zono de lia lumbo, kaj fideleco la zono de liaj
koksoj. 6 Kaj loĝos lupo kun ŝafido, kaj leopardo kuŝos
kun kaprido; kaj bovido kaj leonido kaj grasigita bruto
estos kune, kaj malgranda knabo ilin kondukos. 7 Kaj
bovino paŝtiĝos kun urso, kaj iliaj idoj kuŝos kune; kaj
leono simile al bovo manĝos pajlon. 8 Kaj suĉinfano
ludos super la truo de aspido, kaj demamigita infano
metos sian manon sur la neston de vipuro. 9 Oni
ne malbonagos kaj ne difektos sur Mia tuta sankta
monto, ĉar la tero estos tiel plena de konado de la
Eternulo, kiel la akvo plenigas la maron. 10 En tiu
tempo al la radiko de Jiŝaj, kiu staros kiel standardo
por la popoloj, celados la nacioj; kaj lia ripozejo estos
honoro. 11 En tiu tempo la Sinjoro denove etendos
Sian manon, por akiri la restaĵon de Sia popolo, kiu
restis de Asirio kaj de Egiptujo kaj de Patros kaj de
Etiopujo kaj de Elam kaj de Ŝinar kaj de Ĥamat kaj de
la insuloj de la maro. 12 Kaj Li levos standardon inter
la nacioj kaj kolektos la dispelitojn de Izrael, kaj la
disĵetitojn de Jehuda Li kolektos de la kvar finoj de la
tero. 13 Kaj malaperos la envio kontraŭ Efraimon, kaj
la premantoj de Jehuda ekstermiĝos; Efraim ne envios
Jehudan, kaj Jehuda ne premos Efraimon. 14 Sed ili
flugos kune al la Filiŝtoj okcidenten, prirabos la filojn
de la oriento, sur Edomon kaj Moabon ili metos sian
manon; kaj la Amonidoj ilin obeos. 15 Kaj la Eternulo
sekigos la golfon de Egiptujo, kaj svingos Sian manon
kun forta vento super la Rivero, kaj dividos ĝin en
sep riveretojn, kiujn oni povos transiri en ŝuoj. 16 Kaj
estos vojo por la restaĵo de Lia popolo, kiu restos de
Asirio, kiel estis al Izrael en la tempo, kiam li eliris el
la lando Egipta.

**12** En tiu tago vi diros: Mi dankas Vin, ho Eternulo;
ĉar kvankam Vi koleris min, Via kolero jam
foriĝis, kaj Vi konsolas min. 2 Jen Dio estas mia savo:
mi fidas, kaj mi ne timas; ĉar Dio, la Eternulo, estas
mia forto kaj mia kanto, kaj Li fariĝis mia savo. 3 Kaj
vi ĉerpos kun ĝojo akvon el la fontoj de la savo. 4 Kaj
vi diros en tiu tago: Danku la Eternulon, voku Lian
nomon, sciigu Liajn farojn inter la popoloj, memorigu,
ke Lia nomo estas alta. 5 Kantu al la Eternulo, ĉar
majestaĵon Li faris; tio estu sciata sur la tuta tero. 6
Ĝojkriu kaj kantu, loĝantino de Cion; ĉar granda estas
inter vi la Sanktulo de Izrael.

**13** Profetaĵo pri Babel, kiun viziis Jesaja, filo de
Amoc. 2 Sur senarba monto levu standardon,
laŭte voku al ili, faru signon per la mano, ke ili eniru
en la pordegon de la eminentuloj. 3 Mi ordonis al Miaj
sanktigitoj, Mi kunvokis al Mia kolero Miajn fortulojn,
kiuj ĝojas pro Mia majesteco. 4 Bruo de amaso estas
sur la montoj, kvazaŭ de grandnombra popolo! bruo
de la regnoj de nacioj kolektiĝintaj! la Eternulo Cebaot
ĉirkaŭrigardas la batalontan militistaron. 5 Ili venis el
lando malproksima, de la rando de la ĉielo, la Eternulo
kaj la iloj de Lia kolero, por ruinigi la tutan landon. 6
Ĝemu, ĉar proksima estas la tago de la Eternulo; kiel
katastrofo ĝi venos de la Plejpotenculo. 7 Tial ĉiuj
manoj senfortiĝas kaj ĉiu homa koro senkuraĝiĝas.
8 Ili estas terurataj, spasmoj kaj doloroj ilin atakas,
ili sin tordas, kiel naskantino; kun miro ili rigardas
unu alian, iliaj vizaĝoj flamas. 9 Jen venis la tago de
la Eternulo, kruela kaj kolera kaj furioza, por fari la
landon dezerto kaj ekstermi el ĝi ĝiajn pekulojn. 10
La steloj de la ĉielo kaj ĝiaj stelfiguroj ne donas sian
lumon, la suno mallumiĝis leviĝante, kaj la luno ne
briligos sian lumon. 11 Mi repagos al la mondo la
malbonon kaj al la malpiuloj ilian kulpon; Mi ĉesigos
la fierecon de la malhumiluloj, kaj la arogantecon
de la potenculoj Mi malaltigos. 12 Mi faros, ke viro
estos pli kara, ol oro, kaj homo estos pli kara, ol
la ora metalo el Ofir. 13 Por tio Mi ektremigos la
ĉielon, kaj la tero skuiĝos el sia loko, pro la kolero
de la Eternulo Cebaot kaj en la tago de Lia flama
kolero. 14 Ili estos kiel gazelo persekutata, kiel ŝafo
forlasita; ĉiu sin turnos al sia popolo, kaj ĉiu kuros al
sia lando. 15 Ĉiu renkontita estos trapikita, kaj ĉiu
kaptita falos de glavo. 16 Iliaj infanoj estos frakasitaj
antaŭ iliaj okuloj; iliaj domoj estos prirabitaj, kaj iliaj
edzinoj estos malhonoritaj. 17 Mi vekos kontraŭ ilin la
Medojn, kiuj ne ŝatas arĝenton kaj oron ne avidas, 18
sed per pafarkoj mortigas junulojn, frukton de ventro
ne kompatas; infanojn ne indulgas ilia okulo. 19 Kaj
Babel, la plej bela el la regnoj, la majesta belaĵo de
la Ĥaldeoj, estos kiel Sodom kaj Gomora, ruinigitaj
de Dio; 20 neniu iam tie sidos, kaj por eterne ĝi
restos neloĝata; Arabo ne starigos tie sian tendon, kaj

paŝtistoj tie ne ripozos. 21 Ripozos tie sovaĝaj bestoj,
kaj iliaj domoj estos plenaj de gufoj, kaj strutoj tie
loĝos, kaj virkaproj tie saltados. 22 Kaj ŝakaloj bruos
en iliaj palacoj, kaj strigoj en la salonoj de amuzo. Kaj
baldaŭ venos ĝia tempo, kaj ĝiaj tagoj ne daŭros.

14 Ĉar la Eternulo ekkompatos Jakobon, kaj denove
elektos Izraelon, kaj reloĝigos ilin en ilia lando.
Kaj fremduloj kuniĝos kun ili, kaj aliĝos al la domo de
Jakob. 2 Kaj popoloj prenos ilin kaj venigos ilin sur
ilian lokon, kaj la domo de Izrael ekposedos ilin en
la lando de la Eternulo kiel sklavojn kaj sklavinojn.
Kaj ili malliberigos siajn malliberigintojn kaj regos
siajn premintojn. 3 Kaj en tiu tago, kiam la Eternulo
ripozigos vin de via suferado kaj de via mizero, kaj de
la malfacila laborado, per kiu oni laborigis vin, 4 vi
eldiros ĉi tiun mokokanton pri la reĝo de Babel, kaj
diros: Kiel kvietiĝis la premanto, ĉesiĝis la tributo! 5
La Eternulo rompis la bastonon de la maljustuloj, la
vergon de la regantoj, 6 kiu kolere batadis popolojn
per batoj senĉesaj, kolere regadis popolojn, senĉese
persekutante. 7 Ekripozis, trankviliĝis la tuta tero,
ĝojkrias, kantante. 8 Eĉ la cipresoj ĝojas pri vi, la
cedroj de Lebanon: De tiu tempo, kiam vi ekkuŝis,
neniu hakanto venas al ni. 9 Ŝeol sube ekskuiĝis
pro vi, renkontante vin venantan; ĝi vekis por vi la
mortintojn, ĉiujn potenculojn de la tero; ĝi levis por
vi de iliaj tronoj ĉiujn reĝojn de la popoloj. (Sheol h7585)
10 Ili ĉiuj ekparolos kaj diros al vi: Vi ankaŭ senfortiĝis,
kiel ni, vi similiĝis al ni; 11 en Ŝeolon estas ĵetita via
majesto kaj la bruo de viaj psalteroj; sub vi sterniĝos
vermoj, kaj vermoj estos via kovrilo. (Sheol h7585) 12
Kial vi falis de la ĉielo, ho brilo, filo de la matenruĝo!
hakita sur la teron vi estas, ho turmentinto de la
popoloj. 13 Kaj vi diris en via koro: Mi supreniros en
la ĉielon, pli alten ol la steloj de Dio mi levos mian
tronon, kaj mi sidos sur la monto de kunveno, ĉe la
rando de nordo; 14 mi supreniros sur la altaĵon de la
nuboj, mi similiĝos al la Plejaltulo. 15 Sed en Ŝeolon vi
estos mallevita, en la profundon de la tombo! (Sheol
h7585) 16 Tiuj, kiuj vin vidos, rigardos vin atente, kaj
miros: Ĉu ĉi tio estas la viro, kiu tremigis la teron,
teruris regnojn, 17 kiu faris la mondon dezerto kaj
ruinigis ĝiajn urbojn, kiu siajn kaptitojn ne liberigis
hejmen? 18 Ĉiuj reĝoj de popoloj kuŝas kun honoro,
ĉiu en sia domo; 19 sed vi estas forĵetita el via tombo,
kiel malŝatata branĉo, kovrita de mortigitoj, trapikitaj
per glavo, ĵetitaj malsupren en kavon, kiel kadavro
piedpremata. 20 Vi ne estos kun ili en tombo, ĉar
vian landon vi ruinigis, vian popolon vi mortigis;
la semon de malbonaguloj oni neniam nomos. 21
Preparu liajn filojn por buĉo pro la pekoj de iliaj
patroj, por ke ili ne leviĝu kaj ne heredu la landon kaj
ne plenigu la mondon per urboj. 22 Mi leviĝos kontraŭ
ilin, diras la Eternulo Cebaot; kaj Mi ekstermos de
Babel la nomon kaj restaĵon kaj filon kaj nepon, diras
la Eternulo. 23 Kaj Mi faros ĝin heredaĵo de botaŭroj,
kaj akvaj marĉoj, kaj Mi balaos ĝin per balailo de
pereigo, diras la Eternulo Cebaot. 24 Ĵuris la Eternulo
Cebaot, dirante: Kiel Mi intencis, tiel fariĝos; kaj
kiel Mi decidis, tiel efektiviĝos; 25 frakasita estos la
Asiriano en Mia lando, kaj sur Miaj montoj Mi lin
dispremos, por ke foriĝu de ili lia jugo kaj lia ŝarĝo
estu deprenita de sur iliaj ŝultroj. 26 Tio estas la
decido, farita pri la tuta tero; kaj tio estas la mano,
etendita super ĉiujn popolojn. 27 Ĉar la Eternulo
Cebaot decidis, kaj kiu malhelpos? kaj Lia mano estas
etendita, kiu do ĝin returnos? 28 En la jaro de la morto
de la reĝo Aĥaz estis farita la sekvanta profetaĵo: 29
Ne ĝoju, tuta Filiŝtujo, ke rompita estas la vergo, kiu
vin batadis; ĉar el la radiko de serpento eliros vipuro,
kaj ĝia produkto estos fluganta serpento. 30 Kaj la
unuenaskitoj de malriĉuloj paŝtiĝos, kaj senhavuloj
ripozos sendanĝere; kaj Mi pereigos per malsato vian
radikon, kaj via restaĵo estos mortigita. 31 Ĝemploru,
ho pordego; kriu, ho urbo; perdis la kuraĝon la tuta
Filiŝtujo; ĉar de nordo venas fumo, kaj neniu restas
sola en iliaj taĉmentoj. 32 Kaj kion oni respondos
al la senditoj de la popolo? Ke la Eternulo fortikigis
Cionon, kaj en ĝi trovos defendon la malriĉuloj de Lia
popolo.

15 Profetaĵo pri Moab: En nokto ruiniga pereis Ar-
Moab, en nokto ruiniga pereis Kir-Moab. 2 Ili iris
en la domon kaj sur la altaĵojn de Dibon, por plori; pri
Nebo kaj Medba ĝemploras Moab; ĉiuj kapoj estas
kalvaj, ĉiuj barboj estas razitaj. 3 Sur siaj stratoj ili
ĉirkaŭzonis sin per sakaĵoj; sur iliaj tegmentoj kaj
placoj ĉiuj ĝemkrias, konsumiĝas per plorado. 4 Krias
Ĥeŝbon kaj Eleale, ĝis Jahac oni aŭdas ilian voĉon; tial
ĝemploras la armitoj de Moab, lia animo tremas en
li. 5 Mia koro krias pro Moab; liaj forkurintoj kuras
ĝis Coar, ĝis la tria Eglat; ĉar laŭ la vojo supren al
Luĥit ili iras plorante, ĉar sur la vojo al Ĥoronaim

leviĝas kriado de malfeliĉo. 6 Ĉar la akvo de Nimrim
sekforiĝis, ĉar sekiĝis la herbo, malaperis kreskaĵoj,
verdaĵo jam ne ekzistas. 7 Tial la abundaĵon, kiun ili
kolektis, kaj sian ŝparitaĵon ili transportas trans la
riveron de la salikoj. 8 Ĉar la kriado ĉirkaŭas la limojn
de Moab, ĝis Eglaim atingas lia plorado, kaj ĝis Beer-
Elim atingas lia plorado. 9 Ĉar la akvo de Dimon estas
plena de sango; ĉar Mi ankoraŭ pli multe venigos sur
Dimonon, leonon sur la saviĝintojn de Moab kaj sur la
restaĵon de la lando.

16 Sendu ŝafidon al la reganto de la tero el Sela en la
dezerto sur la monton de la filino de Cion. 2 Kiel
vaganta birdo, elpelita el la nesto, tiel estos la filinoj
de Moab ĉe la transirejoj de Arnon. 3 Aranĝu konsilon,
faru decidon; simile al nokto faru vian ombron meze
de la tago; kaŝu la elpelitojn, ne malkaŝu la vaganton.
4 Miaj elpelitaj Moabidoj loĝu ĉe vi; estu por ili ŝirmo
kontraŭ la rabanto, ĝis ĉesiĝos la premado, finiĝos
la rabado, malaperos la piedpremanto el la lando. 5
Kaj fortikiĝos trono per favorkoreco, kaj sur ĝi kun
justeco en la tendo de David sidos juĝisto, celanta
justecon, akcelanta la veron. 6 Ni aŭdis pri la fiereco
de Moab, ke ĝi estas tre granda; lia malhumileco kaj
fiereco kaj furiozado estas pli granda, ol lia forto. 7
Tial ĝemkrios Moab pri si mem, ĉiuj ĝemkrios; pri
la fundamentoj de Kir-Ĥareset ili ploras, profunde
frapitaj. 8 Ĉar la kampoj de Ĥeŝbon dezertiĝis, ankaŭ
la vinberĝardenoj de Sibma; la estroj de la popoloj
dishakis la plej bonajn branĉojn, kiuj atingis ĝis Jazer,
etendiĝis en la dezerton; ĝiaj markotoj disĵetiĝis,
transiris la maron. 9 Tial per la ploro de Jazer mi
ploros pri la vinberĝardeno de Sibma; mi priverŝos
vin per miaj larmoj, ho Ĥeŝbon kaj Eleale; ĉar krioj
de triumfo falis sur viajn somerajn fruktojn kaj sur
vian grenrikolton. 10 Foriĝis de la kampo ĝojo kaj
gajeco, kaj en la vinberĝardenoj oni ne kantas nek
ĝojkrias; vinon en la vinpremejoj oni ne premas; la
ĝojkriojn Mi ĉesigis. 11 Tial mia interno sonas pri
Moab kiel harpo, kaj mia koro pri Kir-Ĥeres. 12 Kaj
kiam montriĝos, ke Moab senfortiĝis sur la altaĵo, kaj
eniros en sian templon, por preĝi, li nenion atingos.
13 Tio estas la vorto, kiun la Eternulo diris pri Moab
antaŭ longe. 14 Sed nun la Eternulo diris jene: Post tri
jaroj, kiel estas la jaroj de dungito, malaltiĝos la gloro
de Moab kun la tuta grandnombreco, kaj restos tre
malmulte, malgrandnombre.

17 Profetaĵo pri Damasko: Jen Damasko ne plu estos
urbo, sed ĝi estos amaso da ruinaĵoj. 2 Forlasitaj
estos la urboj de Aroer; brutaroj tie paŝtiĝos, kaj neniu
ilin fortimigos. 3 Kaj detruita estos la fortikaĵo de
Efraim, kaj la regno de Damasko kaj la restaĵo de Sirio
estos kiel la gloro de la Izraelidoj, diras la Eternulo
Cebaot. 4 En tiu tempo maldikiĝos la gloro de Jakob,
kaj lia grasa korpo malgrasiĝos. 5 Kaj estos tiel, kiel
kiam rikoltanto enkolektis la grenon kaj lia mano
rikoltis la spikojn, kaj estos kiel post la rikolto de
spikoj en la valo Refaim. 6 Kaj restos tie postrikoltaĵo,
kiel ĉe la skuado de olivarbo: du, tri olivoj sur la supro
de alta branĉo, kvar, kvin sur la branĉoj fruktoportaj,
diras la Eternulo, Dio de Izrael. 7 En tiu tempo la homo
sin turnos al sia Kreinto, kaj liaj okuloj ekrigardos
al la Sanktulo de Izrael. 8 Kaj li ne turnos sin al la
altaroj, faritaj de liaj manoj, kaj ne rigardos al la
faritaĵo de siaj fingroj, al la sanktaj stangoj kaj la
idoloj de la suno. 9 En tiu tempo liaj urboj fortikigitaj
estos kiel ruinoj en arbaro aŭ sur altaĵo, kiujn oni
forlasis pro la Izraelidoj, kaj ili estos dezertaj. 10 Ĉar vi
forgesis la Dion de via savo kaj ne memoris la Rokon
de via forteco; tial vi plantis plantaĵojn plezurigajn
kaj kreskigis fremdan vinberbranĉon; 11 en la tago,
kiam vi plantis, vi zorgis pri la kreskado, kaj en la
mateno, kiam vi semis, vi zorgis pri la floroj; sed
en la tago de ricevado estas ne rikolto, sed doloro
suferiga. 12 Ho ve! bruo de multe da popoloj; ili bruas
simile al la bruo de maroj; kaj tumulto de gentoj, kiel
tumulto de grandaj akvoj. 13 Gentoj bruas simile al la
bruado de grandaj akvoj; sed Li minace ekkrios al ili,
kaj ili forkuros malproksimen, kaj ili estos pelataj,
kiel grenventumaĵo sur la montoj estas pelata de
vento, kaj kiel polvo estas pelata de ventego. 14 Dum
la vespero jen estas teruro; sed antaŭ la mateno ili
jam ne ekzistas. Tia estas la sorto de niaj premantoj
kaj la loto de niaj rabantoj.

18 Ve al la lando flanke ombrata, kiu troviĝas transe
de la riveroj Etiopaj, 2 kiu sendas senditojn per
la maro kaj per kanaj ŝipoj sur la akvo! Iru, rapidaj
senditoj, al la popolo grandkreska kaj glathaŭta, al la
popolo, kiu estas pli terura, ol kia ajn alia, al la popolo
laŭregulara kaj piedpremanta, kies landon tratranĉas
riveroj. 3 Vi ĉiuj, kiuj troviĝas en la mondo kaj loĝas
sur la tero! rigardu, kiam oni levos standardon; kaj
aŭskultu, kiam oni ekblovos per trumpeto. 4 Ĉar tiel

diris al mi la Eternulo: Mi restos trankvila kaj rigardos
en Mia loĝejo, kiel serena varmego ĉe hela lumo,
kiel rosa nubo ĉe varmego de rikolto. 5 Ĉar antaŭ
la rikolto, kiam la florado finiĝis kaj la floro fariĝis
matura bero, Li detranĉos la branĉojn per tranĉiloj kaj
deprenos la vinberbranĉojn. 6 Ĉio kune estos lasita
por la rabobirdoj de la montoj kaj por la bestoj de la
tero; kaj la rabobirdoj loĝos super ĝi en somero, kaj
ĉiaj bestoj de la tero super ĝi vintros. 7 En tiu tempo
sur la lokon de la nomo de la Eternulo Cebaot, sur la
monton Cion, alportos donacojn al la Eternulo Cebaot
la popolo grandkreska kaj glathaŭta, la popolo, kiu
estas pli terura, ol kia ajn alia, la popolo laŭregulara
kaj piedpremanta, kies landon tratranĉas riveroj.

**19** Profetaĵo pri Egiptujo: Jen la Eternulo veturos sur
malpeza nubo kaj venos Egiptujon. Kaj ektremos
antaŭ Li la idoloj de Egiptujo, kaj la koro de la Egiptoj
senkuraĝiĝos interne de ili. 2 Kaj Mi tumultigos
Egiptojn kontraŭ Egiptojn; kaj militos ĉiu kontraŭ
sia frato kaj ĉiu kontraŭ sia amiko, urbo kontraŭ
urbo, regno kontraŭ regno. 3 Kaj malaperos la kuraĝo
de la Egiptoj interne de ili, kaj Mi detruos iliajn
intencojn; kaj ili demandos la idolojn kaj la sorĉistojn
kaj la aŭguristojn kaj la antaŭdiristojn. 4 Kaj Mi
transdonos la Egiptojn en la manon de kruela sinjoro,
kaj senkompata reĝo regos super ili, diras la Sinjoro,
la Eternulo Cebaot. 5 Kaj sekforiĝos la akvo el la maro,
kaj la rivero senakviĝos kaj sekiĝos. 6 Kaj senhaviĝos
la riveroj, elĉerpiĝos kaj sekiĝos la kanaloj de Egiptujo,
kano kaj junko velkos. 7 La herbejoj apudakvaj, super
la akvo mem, kaj ĉio semita apud la akvo velkos,
sekiĝos, kaj malaperos. 8 Kaj malĝojos la fiŝkaptistoj,
kaj ploros ĉiuj, kiuj ĵetas fiŝhokojn en la akvon, kaj
la etendantoj de retoj surakvaj estos malfeliĉaj. 9
Kaj hontos la prilaboristoj de lino kombita kaj la
teksistoj de blanka tolo. 10 Kaj la pilastroj de la
lando estos disbatitaj; ĉiuj dungatoj estos malgajaj. 11
Malsaĝaj estas la princoj de Coan; la saĝaj konsilistoj
de Faraono fariĝis senkonsilaj. Kiel vi diros al Faraono:
Mi estas filo de saĝuloj, ido de antikvaj reĝoj? 12
Kie do nun estas viaj saĝuloj? ili do diru al vi kaj
sciigu, kion la Eternulo Cebaot decidis pri Egiptujo. 13
Malsaĝiĝis la princoj de Coan, trompiĝis la princoj de
Nof, erarigis Egiptujon, la fundamenton de siaj gentoj.
14 La Eternulo verŝis en ilin spiriton de konfuzo; kaj
ili erarigis Egiptujon en ĉiuj ĝiaj faroj, kiel ebriulo
ŝanceliĝas vomante. 15 Kaj estos en Egiptujo nenia
faro, kiun farus kapo aŭ vosto, branĉo aŭ kano. 16
En tiu tempo Egiptujo estos kiel virinoj; ĝi tremos
kaj timos antaŭ la moviĝo de la mano de la Eternulo
Cebaot, kiun Li svingos super ĝi. 17 Kaj la lando
de Jehuda fariĝos teruraĵo por la Egiptoj; ĉiu, kiu
rememoros ĝin, ektimos, pro la decido de la Eternulo
Cebaot, kiun Li decidis pri ili. 18 En tiu tempo estos
en la lando Egipta kvin urboj, parolantaj la lingvon
Kanaanan kaj ĵurantaj per la Eternulo Cebaot; unu
havos la nomon Urbo de Detruo. 19 En tiu tempo
estos altaro por la Eternulo meze de la lando Egipta,
kaj monumento por la Eternulo apud ĝia limo; 20
kaj ĝi estos signo kaj atesto pri la Eternulo Cebaot
en la lando Egipta; ĉar ili krios al la Eternulo pro la
premantoj, kaj Li sendos al ili savanton kaj potenculon,
kiu savos ilin. 21 Kaj la Eternulo fariĝos konata al
la Egiptoj; kaj la Egiptoj tiam ekkonos la Eternulon,
kaj alportos buĉoferojn kaj farunoferojn, kaj faros
sanktajn promesojn al la Eternulo kaj plenumos. 22
La Eternulo frapos la Egiptojn, frapos kaj resanigos;
kaj ili returnos sin al la Eternulo, kaj Li aŭskultos
ilian peton kaj resanigos ilin. 23 En tiu tempo estos
vojo de Egiptujo al Asirio; kaj la Asirianoj venados
en Egiptujon kaj la Egiptoj en Asirion, kaj la Egiptoj
servados kune kun la Asirianoj. 24 En tiu tempo Izrael
estos triope kun Egiptujo kaj Asirio; estos beno sur la
tero. 25 La Eternulo Cebaot benos ilin, dirante: Benataj
estu Mia popolo la Egiptoj, kaj Asirio, verko de Miaj
manoj, kaj Mia heredaĵo Izrael.

**20** En la jaro, kiam Tartan venis Aŝdodon, kien
lin sendis Sargon, reĝo de Asirio, kaj li militis
kontraŭ Aŝdod kaj prenis ĝin, 2 en tiu tempo la
Eternulo parolis per Jesaja, filo de Amoc, dirante: Iru,
kaj demetu la sakaĵon de via lumbo, kaj demetu la
ŝuojn de viaj piedoj. Kaj li faris tiel; li iris nuda kaj
nudpieda. 3 Kaj la Eternulo diris: Kiel Mia servanto
Jesaja iris nuda kaj nudpieda por trijara montrado
kaj antaŭdirado pri Egiptujo kaj Etiopujo, 4 tiel la
reĝo de Asirio kondukos la kaptitajn Egiptojn kaj la
ekzilitajn Etiopojn, junulojn kaj maljunulojn, nudajn
kaj nudpiedajn kaj kun nudaj hontaj partoj, malhonore
por la Egiptoj. 5 Kaj ili havos teruron kaj honton pro
Etiopujo, kiun ili fidis, kaj pro Egiptujo, pri kiu ili
fanfaronis. 6 Kaj en tiu tempo diros la loĝantoj de tiu
apudmara lando: Jen kia estas nia fidita lando, kien ni

kuris, por serĉi helpon, por savi nin kontraŭ la reĝo
de Asirio; kiamaniere ni nun savos nin?

**21** Profetaĵo pri la apudmara dezerto: Kiel
renversanta de ventego de sudo, li venas el la
dezerto, el lando terura. 2 Kruela vizio estas montrita al
mi: rabanto rabas, kaj ruiniganto ruinigas. Supreniru,
ho Elam; sieĝu, ho Medujo; ĉiun ĝemadon mi ĉesigis.
3 Tial mia lumbo estas plena de doloro; turmentoj
kaptis min, kiel turmentoj de naskantino; mi tordiĝis,
kiam mi aŭdis; mi sentis teruron, kiam mi vidis. 4
Konsterniĝas mia koro, teruro min frapis; la ĉarma
nokto fariĝis por mi teruro. 5 Preparu tablon, starigu
gardostarantojn, manĝu, trinku. Leviĝu, princoj, ŝmiru
la ŝildon. 6 Ĉar tiele diris al mi mia Sinjoro: Iru, starigu
observanton; kion li vidos, li diru. 7 Kaj li vidis vicojn
da ĉevaloj duope, vicojn da azenoj, vicojn da kameloj;
kaj li aŭskultis atente, kun granda atento. 8 Kaj li
ekkriis kiel leono: Mia sinjoro, mi staris konstante sur
mia observejo dum la tago, kaj sur mia gardejo mi
staris tutajn noktojn; 9 kaj jen venis viro, veturanta
sur duĉevala ĉaro, kaj li ekkrias kaj diras: Falis, falis
Babel, kaj ĉiuj idoloj de ĝiaj dioj rompiĝis sur la teron.
10 Mia draŝaĵo, kaj filo de mia garbejo! kion mi aŭdis
de la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael, tion mi diris al vi.
11 Profetaĵo pri Duma: Oni krias al mi el Seir: Gardisto,
kiom da nokto restas? gardisto, kiom da nokto restas?
12 La gardisto diris: Venis la mateno, kaj tamen estas
nokto; se vi volas demandi, demandu, revenu denove.
13 Profetaĵo pri Arabujo: En la arbaro Arabuja pasigu la
nokton, karavanoj Dedanaj! 14 Elportu akvon renkonte
al la soifanto, vi, loĝantoj de la lando Tema, kun pano
renkontu la forkurinton; 15 ĉar oni forkuras de glavo,
de akrigita glavo, kaj de pafarko streĉita, kaj de kruela
batalo. 16 Ĉar tiele diris al mi la Sinjoro: Post unu
jaro, kiel la jaro de dungito, malaperos la tuta gloro
de Kedar; 17 kaj la restaĵo de la heroaj arkpafistoj de
Kedar estos malgranda; ĉar la Eternulo, Dio de Izrael,
diris.

**22** Profetaĵo pri la valo de vizio: Kio nun estas al
vi, ke vi ĉiuj iris sur la tegmentojn? 2 Vi, plena
de bruo, urbo tumulta, urbo gaja, viaj mortigitoj ne
estas mortigitaj per glavo kaj ne mortis en batalo; 3
ĉiuj viaj ĉefoj kune forkuris de pafarko; ĉiuj, kiujn
oni trovis ĉe vi, estas ligitaj; ligitaj estas kune ĉiuj,
kiuj forkuris malproksimen. 4 Tial mi diris: Forturnu
vin de mi, mi ploros maldolĉe; ne penu konsoli min
pri la malfeliĉo de la filino de mia popolo. 5 Ĉar
tio estas tago de konsterno kaj de piedpremado kaj
de konfuzo antaŭ la Sinjoro, la Eternulo Cebaot, en
la valo de vizio; detruado de muroj kaj vokado al
la montoj. 6 Kaj Elam portis sagujon en vico da
rajdantoj, kaj Kir briligis ŝildon. 7 Kaj viaj plej bonaj
valoj pleniĝis de ĉaroj, kaj rajdantoj sin aranĝis antaŭ
la pordego. 8 Kaj oni formetis la kurtenon de Jehuda;
kaj vi rigardis en tiu tago la armilojn de la arbara
domo, 9 kaj vi vidis, ke estas multe da fendoj en la
urbo de David; kaj vi kolektis la akvon de la malsupra
lageto. 10 Kaj vi kalkulis la domojn de Jerusalem; kaj
vi detruis la domojn, por fortikigi la muron. 11 Kaj
inter la du muroj vi faris basenon por la akvo de la
malnova lageto. Sed vi ne direktis vian rigardon al
Tiu, kiu tion faris, kaj ĝian antikvan Kreinton vi ne
rigardis. 12 Kaj en tiu tago la Sinjoro, la Eternulo
Cebaot, vokis, ke oni ploru kaj kriu, kaj detranĉu siajn
harojn kaj surmetu sur sin sakaĵon. 13 Jen estas ĝojo
kaj gajeco: oni mortigas bovojn, buĉas ŝafojn; oni
manĝas viandon kaj trinkas vinon, dirante: Ni manĝu
kaj trinku, ĉar morgaŭ ni mortos. 14 Sed al mia orelo
malkaŝis la Eternulo Cebaot: Ĉi tiu malbonagado ne
estos pardonita al vi, ĝis vi mortos, diris la Sinjoro, la
Eternulo Cebaot. 15 Tiele diris la Sinjoro, la Eternulo
Cebaot: Iru, venu al tiu administranto, al Ŝebna, la
palacestro, kaj diru: 16 Kion vi havas ĉi tie? kaj kiun
vi havas ĉi tie, ke vi elhakigis al vi ĉi tie tombon?
Li elhakigas alte sian tombon, li elĉizigas en la roko
loĝejon por si. 17 Jen la Eternulo forte vin ĵetos kaj
forte vin kaptos; 18 Li volvos vin kaj rulos kiel globon
en vastan landon; tie vi mortos, tie restos la ĉaroj de
via gloro, vi, malhonoro de la domo de via sinjoro! 19
Kaj Mi depuŝos vin de via posteno, kaj el via ofico
vi estos forigita. 20 Kaj en tiu tago Mi alvokos Mian
servanton Eljakim, filon de Ĥilkija, 21 kaj Mi vestos
lin per via ĥitono kaj zonos per via zono, kaj vian
regadon Mi transdonos en lian manon; kaj li estos
patro por la loĝantoj de Jerusalem kaj por la domo
de Jehuda. 22 Kaj Mi metos la ŝlosilon de la domo de
David sur lian ŝultron; kaj li malfermos, kaj neniu
fermos; kaj li fermos, kaj neniu malfermos. 23 Kaj
Mi fortikigos lin kiel najlon sur loko fidinda, kaj li
estos trono de honoro en la domo de sia patro. 24 Kaj
pendos sur li la tuta gloro de la domo de lia patro, la
infanoj kaj idoj, ĉiuj malgrandaj vazoj, de la vazoj por
manĝado ĝis la vazoj por trinkado. 25 En tiu tago, diras

la Eternulo Cebaot, estos forigita la najlo, fortikigita
sur loko fidinda; ĝi estos rompita kaj falos, kaj pereos
la ŝarĝo, kiu estis sur ĝi; ĉar la Eternulo diris.

**23** Profetaĵo pri Tiro: Plorkriu, ho ŝipoj de Tarŝiŝ; ĉar
ĝi estas detruita tiel, ke restis neniu domo, neniu
pordo. El la lando de la Kitidoj tio estas sciigita al ili. 2
Silentu, ho loĝantoj de la apudmara lando. Komercistoj
de Cidon, transveturantaj la maron, vin plenigadis;
3 sur granda akvo oni venigadis al ĝi semojn de
Ŝiĥor, rikoltaĵon de Nilo; kaj ĝi estis komercejo de
la popoloj. 4 Hontu, Cidon; ĉar la maro, la mara
fortikaĵo diris: Mi ne havis dolorojn, mi ne naskis,
mi ne edukis knabojn, mi ne kreskigis knabinojn. 5
Kiam oni tion aŭdos en Egiptujo, oni ektremos ĉe
la sciigo pri Tiro. 6 Transiru al Tarŝiŝ, plorkriu, ho
loĝantoj de la apudmara lando. 7 Ĉu tio estas via gaja
urbo, la tre antikva? ĝiaj piedoj forportas ĝin, por loĝi
malproksime. 8 Kiu decidis tion pri Tiro, la kronita,
kies komercistoj estas princoj kaj kies negocistoj estas
eminentuloj de la lando? 9 La Eternulo Cebaot tion
decidis, por malaperigi la majeston de ĉiu gloro, por
humiligi ĉiujn eminentulojn de la lando. 10 Trapasu
vian landon kiel rivero, ho filino de Tarŝiŝ; jam nenio
vin zonas. 11 Sian manon Li etendis super la maron, Li
skuis regnojn; la Eternulo faris ordonon pri Kanaan,
por ekstermi liajn fortikaĵojn. 12 Kaj Li diris: Vi en
plu estos gaja, vi, senhonorigita virgulino, filino de
Cidon! Leviĝu, transiru al la Kitidoj; sed ankaŭ tie vi
ne havos trankvilecon. 13 Jen la lando de la Ĥaldeoj:
ĉi tiu popolo ne ekzistis; la Asiriano ĝin fondis por
la loĝantoj de la dezerto; ili starigis sieĝajn turojn,
detruis ĝiajn palacojn, faris ĝin ruino. 14 Plorkriu,
ho ŝipoj de Tarŝiŝ; ĉar detruita estas via potenco. 15
En tiu tempo Tiro estos forgesita dum sepdek jaroj,
kiuj estas kiel la tempo de unu reĝo; post la fino de
la sepdek jaroj estos kun Tiro tio, kion oni kantas
pri malĉastistino: 16 Prenu la harpon, ĉirkaŭiru la
urbon, ho forgesita malĉastistino; ludu bone, kantu
multe, por ke oni rememoru vin. 17 Kaj post la fino de
la sepdek jaroj la Eternulo vizitos Tiron, kiu denove
ricevados promalĉastajn donacojn kaj malĉastados
kun ĉiuj regnoj de la mondo sur la supraĵo de la
tero. 18 Kaj ĝia komercenspezo kaj ĝiaj promalĉastaj
donacoj estos konsekritaj al la Eternulo; ili ne estos
kolektataj en trezorejon nek konservataj; sed por tiuj,
kiuj loĝas antaŭ la vizaĝo de la Eternulo, estos ĝia
komercenspezo, por ke ili manĝu sate kaj havu belajn
vestojn.

**24** Jen la Eternulo dezertigas la landon kaj ruinigas
ĝin kaj ŝanĝas ĝian aspekton kaj disĵetas ĝiajn
loĝantojn. 2 Kaj estos al la popolo kiel al la pastro,
al la servisto kiel al lia mastro, al la servistino kiel
al ŝia mastrino, al la aĉetanto kiel al la vendanto,
al la pruntedonanto kiel al la prunteprenanto, al la
ŝuldanto kiel al la kreditoro. 3 Tute dezertigita estos
la lando kaj tute prirabita; ĉar la Eternulo tion diris. 4
Funebras kaj velkas la lando, senfortiĝas kaj velkas la
mondo, senfortiĝas la eminentuloj de la popolo de la
lando. 5 Kaj la tero estas malpurigita de siaj loĝantoj;
ĉar ili malobeis la instruon, ŝanĝis la leĝon, detruis
la eternan interligon. 6 Pro tio malbeno konsumis
la teron, kaj kulpiĝis tiuj, kiuj loĝas sur ĝi; pro tio
forbrulis la loĝantoj de la lando kaj restis malmulte da
homoj. 7 Malgaja estas la mosto, sensukiĝis la vinbero,
ĝemas ĉiuj ĝojintoj. 8 Ĉesiĝis la gajeco de tamburinoj,
malaperis la bruo de gajuloj, ĉesiĝis la gajeco de
harpo. 9 Oni ne trinkas vinon ĉe kantado; maldolĉa
estas ebriigaĵo por siaj trinkantoj. 10 Ruinigita estas
la dezerta urbo; ĉiuj domoj estas fermitaj tiel, ke
oni ne povas eniri. 11 Oni ploras sur la stratoj pri
vino; mallumiĝis ĉia ĝojo, malaperis la gajeco de la
lando. 12 En la urbo restis dezerteco, kaj la pordegoj
disbatitaj estas ruinigitaj. 13 Ĉar tiel estos meze de la
lando, meze de la popoloj: kiel post fruktoskuo de
olivarbo, kiel estas al la restintaj beroj post la fino de
la vinberrikolto. 14 Ili levos sian voĉon kaj ĝojkrios, pri
la majesto de la Eternulo ili krios de la maro. 15 Tial en
la regionoj orientaj gloru la Eternulon, sur la insuloj
de la maro la nomon de la Eternulo, Dio de Izrael. 16
De la rando de la tero ni aŭdis kantadon: Gloro al la
justulo; sed mi diras: Ho mi malfeliĉa, ho mi malfeliĉa,
ve al mi! rabis rabistoj, kaj per granda rabado ili rabis.
17 Teruro, kavo, kaj kaptilo trafos vin, ho loĝantoj de
la tero. 18 Kaj tiu, kiu forkuros de la voĉo de la teruro,
falos en kavon; kaj kiu eliros el la kavo, trafos en la
kaptilon; ĉar la aperturoj de alte malfermiĝis kaj la
fundamento de la tero ekskuiĝis. 19 Forte diskrevis
la tero, forte dispeciĝis la tero, forte skuiĝis la tero.
20 Ŝanceliĝas la tero kiel ebriulo, kaj balanciĝas kiel
hamako; kaj pezas sur ĝi ĝia krimeco; kaj ĝi falis, kaj
ne plu leviĝos. 21 Kaj en tiu tempo punos la Eternulo
la taĉmentojn de la alto en la ĉielo kaj la reĝojn de la

tero sur la tero. 22 Kaj ili estos kolektitaj kune, ligitaj
en malliberejo, kaj ili estos enŝlositaj en ŝlositejo, kaj
post longa tempo ili estos punitaj. 23 Kaj ruĝiĝos la
luno, kaj hontos la suno, kiam la Eternulo Cebaot
ekreĝos sur la monto Cion kaj en Jerusalem, kaj Lia
gloro aperos antaŭ Liaj plejaĝuloj.

25 Ho Eternulo, Vi estas mia Dio; mi gloros Vin,
mi laŭdos Vian nomon; ĉar Vi faris miraklon;
decidoj antikvaj fariĝis efektivaĵoj kaj veraĵoj. 2 Ĉar Vi
faris el urbo amason da ŝtonoj; urbon fortikigitan Vi
faris ruino; la kasteloj de la barbaroj ne plu prezentas
urbon kaj neniam rekonstruiĝos. 3 Pro tio gloros Vin
popolo potenca, urbo de fortaj gentoj Vin timos. 4
Ĉar Vi fariĝis fortikaĵo por senhavulo, fortikaĵo por
malriĉulo en lia mizero, rifuĝejo kontraŭ pluvego,
ombro kontraŭ varmego; ĉar la spirito de potenculoj
estas kiel pluvego kontraŭ muron. 5 Kiel varmegon en
dezerto Vi kvietigis la malhumilecon de la barbaroj;
kiel varmego per ombro de nubo estas mallaŭtigita la
kantado de la potenculoj. 6 Kaj la Eternulo Cebaot
faros por ĉiuj popoloj sur tiu monto festenon el
grasaĵoj, festenon el bona vino, el grasaĵoj sukoplenaj,
el vinoj ne fermentintaj. 7 Kaj Li forigos sur tiu monto
la kovrilon, kiu kovras ĉiujn popolojn, kaj la kurtenon,
kiu estas etendita super ĉiuj gentoj. 8 Li neniigos la
morton por ĉiam; kaj la Sinjoro, la Eternulo, forviŝos
la larmojn de ĉiuj vizaĝoj, kaj la honton de Sia popolo
Li forigos de la tuta tero; ĉar la Eternulo tion diris.
9 Kaj oni diros en tiu tago: Jen estas nia Dio, al kiu
ni esperis, kaj Li nin savis; jen estas la Eternulo, al
kiu ni esperis, ni ĝoju kaj estu gajaj pro Lia savo.
10 Ĉar haltos la mano de la Eternulo sur tiu monto;
tiam Moab estos dispremita sur sia loko, kiel pajlo
estas dispremata en sterka koto. 11 Kaj se li etendos
siajn manojn meze de ĝi, kiel naĝanto etendas, por
naĝi, tiam humiliĝos lia fiereco kune kun la lerteco
de liaj manoj. 12 Kaj viajn altajn fortikajn murojn Li
renversos, malaltigos, ĵetos sur la teron al la polvo.

26 En tiu tago la jena kanto estos kantata en la
lando Juda: Ni havas urbon potencan; savon Li
starigas kiel murojn kaj remparon. 2 Malfermu la
pordegojn, por ke eniru la popolo justa, konservanta
la fidelecon. 3 Por la fidmensulo Vi konservos pacon
absolutan; ĉar Vin li fidas. 4 Fidu la Eternulon por
ĉiam; ĉar en Dio, la Eternulo, estas roko eterna. 5 Ĉar
Li ĵetis malsupren loĝantojn de la altaĵo, urbon alte
leviĝintan; Li malaltigis ĝin, malaltigis ĝis la tero,
ĵetis ĝin al la polvo. 6 Piedo ĝin premas, la piedoj
de malriĉuloj, la plandoj de senhavuloj. 7 La vojo de
justulo estas rekta; Vi, Pravulo, ebenigas la vojon de
justulo. 8 Eĉ sur la vojo de Via juĝo, ho Eternulo,
ni esperis al Vi; Vian nomon kaj la memoron pri Vi
sopiris nia animo. 9 Per mia animo mi sopiris Vin en
la nokto, per mia spirito en mia interno mi serĉis Vin
matene; ĉar dum Via juĝado sur la tero la loĝantoj
de la mondo lernis justecon. 10 Se malvirtulo estas
indulgata, li ne lernas justecon; en lando de justeco
li agas maljuste kaj ne rigardas la majeston de la
Eternulo. 11 Ho Eternulo, levita estis Via mano, sed ili
ne vidis tion; ili ekvidos kun honto Vian ĵaluzon pri
la popolo; Via flama kolero kontraŭ Viaj malamikoj
formanĝos ilin. 12 Ho Eternulo, Vi starigos por ni
pacon; ĉar ankaŭ ĉiujn niajn aferojn Vi faris por ni. 13
Ho Eternulo, nia Dio! regis super ni sinjoroj krom Vi,
sed nur per Vi ni gloras Vian nomon. 14 Ili mortis
kaj ne reviviĝos, ili estas malvivuloj kaj ne releviĝos;
ĉar Vi ilin punis kaj ekstermis, kaj Vi malaperigis
ĉiun memoron pri ili. 15 Vi multigis la popolon, ho
Eternulo, Vi multigis la popolon; Vi gloriĝis vaste
sur ĉiuj finoj de la tero. 16 Ho Eternulo, en mizero ili
rememoris Vin, ili preĝis mallaŭte, kiam Vi ilin punis.
17 Kiel gravedulino ĉe la alproksimiĝo de la naskado
turmentiĝas kaj krias en siaj doloroj, tiel ni estis antaŭ
Vi, ho Eternulo. 18 Ni estis gravedaj, ni turmentiĝis,
ni naskis kvazaŭ venton; savon ni ne venigis al la
tero, kaj ne falis la loĝantoj de la mondo. 19 Reviviĝos
Viaj mortintoj, miaj kadavroj releviĝos. Vekiĝu kaj
ĝoju vi, kuŝantaj en la tero; ĉar roso sur kreskaĵoj
estas Via roso, kaj la tero elĵetos la mortintojn. 20 Iru,
mia popolo, eniru en viajn ĉambrojn kaj ŝlosu viajn
pordojn post vi; kaŝu vin por mallonga momento,
ĝis pasos la kolero. 21 Ĉar jen la Eternulo eliros el
Sia loko, por puni la malbonagojn de la loĝantoj de
la tero; kaj la tero malkaŝos sian sangon kaj ne plu
kovros siajn mortigitojn.

27 En tiu tago la Eternulo punos per Sia peza
kaj granda kaj forta glavo la levjatanon,
la serpenton eltordiĝeman, kaj la levjatanon, la
serpenton kurbiĝantan; kaj Li mortigos la drakon,
kiu estas en la maro. 2 En tiu tago kantu pri ĝi, pri
la kara vinberĝardeno: 3 Mi, la Eternulo, estas ĝia
gardanto; ĉiumomente Mi trinkigas ĝin; por ke neniu

ĝin difektu, Mi gardas ĝin tage kaj nokte. 4 Ĉu Mi
ne havas koleron? ĉu iu elmetus batale kontraŭ Mi
dornojn kaj pikarbustojn? Mi elpaŝus kontraŭ ilin, kaj
ĉiujn kune forbruligus. 5 Nur en la okazo, se oni serĉus
Mian defendon, por fari pacon kun Mi, oni farus
kun Mi pacon. 6 En la estonteco Jakob enradikiĝos;
Izrael ekfloros kaj ellasos verdajn branĉojn; kaj ili
plenigos la mondon per fruktoj. 7 Ĉu li estis frapata
tiel, kiel estis frapataj liaj frapantoj? aŭ ĉu li estas
mortigita tiel, kiel estas mortigitaj liaj mortigintoj?
8 Nur kiam la mezuro tro pleniĝis, Vi punis lin per
ekzilo: Li elpelis lin per Sia potenca blovo en la tago
de orienta vento. 9 Tial tiamaniere estos forviŝita la
malbonagado de Jakob; kaj la tuta frukto de la forigo
de lia peko konsistos en tio, ke li faros ĉiujn ŝtonojn
de la altaroj kiel dispeciĝintaj kalkŝtonoj, ke ne plu
restu la sanktaj stangoj kaj la idoloj de la suno. 10 Ĉar
urbo fortikigita estos solecigita, loĝloko estos forlasita
kaj forrestigita kiel dezerto; tie paŝtiĝos bovido, tie
ĝi ripozos kaj formanĝos ĝiajn kreskaĵojn. 11 Kiam
sekiĝos ĝiaj branĉoj, oni ilin rompos; venos virinoj
kaj forbruligos ilin. Ĉar tio ne estas popolo prudenta,
tial ĝia Kreinto ne kompatos ĝin, kaj ĝia Farinto ĝin
ne indulgos. 12 Kaj en tiu tago la Eternulo debatos
la fruktojn, komencante de la fluo de la Rivero ĝis
la torento de Egiptujo; kaj vi, ho Izraelidoj, estos
kolektitaj unu post unu. 13 Kaj en tiu tago oni ekblovos
per granda trumpeto, kaj venos tiuj, kiuj perdiĝis en
la lando Asiria kaj kiuj estis elpelitaj en la landon
Egiptan, kaj ili adorkliniĝos antaŭ la Eternulo sur la
sankta monto en Jerusalem.

**28** Ve al la fiera krono de la ebriuloj de Efraim! ilia
bela majesto estas velkinta floro; sur la supro de
grasa kampo ili estas senkonsciigitaj de vino. 2 Jen
la Sinjoro havas fortulon kaj potenculon; kiel hajla
pluvego, kiel pereiga ventego, kiel inundo de forta
disverŝiĝinta akvo, li potence ĵetos ilin sur la teron. 3
Per piedoj estos premata la fiera krono de la ebriuloj
de Efraim. 4 Kaj ilia bela majesto fariĝos velkinta floro
sur la supro de grasa kampo, kiel figo antaŭ la somero;
kiam la vidanto ĝin ekvidas, li, apenaŭ preninte ĝin en
la manon, tuj ĝin englutas. 5 En tiu tago la Eternulo
Cebaot estos majesta krono kaj bela diademo por la
restaĵo de Sia popolo, 6 kaj spirito de justeco por la
sidantoj en la juĝejo, kaj forto por tiuj, kiuj rebatas la
batalon al la pordego. 7 Sed ankaŭ ĉi tiuj ŝanceliĝas
de vino kaj balanciĝas de drinkaĵo; pastro kaj profeto
ŝanceliĝas de drinkaĵo, senkonsciiĝas de vino, vagas
pro drinkaĵo, eraras en la vidado, falpuŝiĝas ĉe la juĝa
verdikto. 8 Ĉar ĉiuj tabloj estas plenaj de vomaĵo kaj
malpuraĵo, mankas jam loko. 9 Al kiu li instruas scion,
kaj al kiu li aŭdigas predikon? ĉu al forprenitaj for de
lakto, al demamigitoj? 10 Ĉar ordono post ordono,
ordono post ordono; regulo post regulo, regulo post
regulo; iom tie, iom ĉi tie. 11 Per balbutantaj lipoj
kaj per lingvo fremda Li parolos al ili, 12 Tiu, kiu
diris al ili: Jen estas ripozejo, lasu la laculon ripozi;
kaj jen estas trankviligo; sed ili ne volis aŭskulti.
13 Kaj aperos al ili la vorto de la Eternulo, ordono
post ordono, ordono post ordono, regulo post regulo,
regulo post regulo, iom tie, iom ĉi tie; por ke ili iru
kaj falu dorsen kaj rompiĝu kaj enretiĝu kaj kaptiĝu.
14 Tial aŭskultu la vorton de la Eternulo, vi, mokistoj,
regantoj de tiu popolo, kiu estas en Jerusalem. 15
Ĉar vi diras: Ni faris interligon kun la morto, kaj kun
Ŝeol ni faris interkonsenton; kiam la frapanta vipo
estos trapasanta, ĝi nin ne atingos, ĉar mensogon
ni faris nia rifuĝejo kaj per malvero ni nin kovros.
(Sheol h7585) 16 Pro tio tiele diris la Sinjoro, la Eternulo:
Jen Mi por fundamento kuŝigas ŝtonon en Cion,
ŝtonon elprovitan, bazangulan, valoregan, fortikigitan
fundamenton; la fidanto ne maltrankviliĝu. 17 Kaj Mi
faros justecon la mezurŝnuro, kaj veron la vertikalo;
kaj hajlo forbatos la rifuĝejon de mensogo, kaj la
kaŝejon forportos akvo. 18 Kaj forigita estos via
interligo kun la morto, kaj via interkonsento kun Ŝeol
ne teniĝos; kiam la frapanta vipo estos trapasanta, vi
estos frakasata de ĝi. (Sheol h7585) 19 Ĉiufoje, kiam ĝi
trairos, ĝi kaptos vin; ĉar ĉiutage ĝi trairos, tage kaj
nokte, kaj terura estos la klarigo, kiun ĝi donos. 20
Ĉar tro mallonga estos la lito, por sin etendi; kaj la
litkovrilo estos tro mallarĝa, por sin enkovri. 21 Ĉar la
Eternulo leviĝos, kiel sur la monto Peracim, Li koleros,
kiel en la valo Gibeona, por plenumi Sian faron, Sian
eksterordinaran faron, kaj fari Sian laboron, Sian
eksterordinaran laboron. 22 Kaj nun ne moku, por
ke viaj katenoj ne plifortiĝu; ĉar mi aŭdis, ke de
la Sinjoro, la Eternulo Cebaot, tio estas neŝanĝeble
decidita pri la tuta lando. 23 Atentu, kaj aŭskultu mian
voĉon; konsideru, kaj aŭskultu mian parolon. 24 Ĉu
ĉiutage la plugisto plugas por semado, sulkaranĝas kaj
erpas sian kampon? 25 Kiam li ebenigis ĝian supraĵon,
li disŝutas ja nigelon kaj disĵetas kuminon kaj metas

tritikon laŭ vicoj kaj hordeon en la difinitan lokon kaj
spelton ĉe la limoj. 26 Tian ordon lernigis al li lia Dio,
Li instruis lin. 27 Ĉar ne per fera draŝilo oni draŝas
nigelon, kaj oni ne rulas radon de ĉaro sur kumino;
sed per bastono oni elbatas nigelon, kaj kuminon per
vergo. 28 Greno estas draŝata; sed ne eterne oni ĝin
draŝas; oni frapas ĝin per la rado de sia ĉaro, sed
per siaj ĉevaloj oni ĝin ne dispremas. 29 Ankaŭ ĉi tio
venas de la Eternulo Cebaot; mirinda estas Lia decido,
granda estas Lia saĝeco.

**29** Ve al Ariel, al Ariel, al la urbo, en kiu sidis David!
aldonu jaron al jaro, la festoj faru sian ciklon. 2
Mi premos Arielon, kaj estos ĝemado kaj malĝojo; kaj
li estos al Mi vera Ariel. 3 Kaj Mi sieĝos vin ĉirkaŭe, kaj
Mi premos vin per remparo, kaj Mi starigos kontraŭ
vi turojn. 4 Kaj vi parolos malalte el sub la tero, kaj
el sub la polvo vi murmuros viajn vortojn; kaj via
voĉo estos kiel voĉo de ventroparolisto el sub la tero,
kaj el sub la polvo vi flustros viajn vortojn. 5 Sed la
multego de viaj malamikoj estos kiel subtila polvo,
kaj la multo de la premantoj estos kiel disfluganta
grenventumaĵo; kaj tio fariĝos subite, neatendite. 6
De la Eternulo Cebaot vi estos punata kun tondro kaj
tertremo kaj granda bruo, kun ventego kaj turnovento
kaj konsumeganta fajra flamo. 7 Kaj kiel sonĝo, kiel
nokta vizio estos la multo de la popoloj, kiuj batalos
kontraŭ Ariel kaj kontraŭ ĉiuj liaj fortikaĵoj kaj kiuj
premos lin. 8 Kiel malsatanto sonĝas, ke li manĝas,
sed li vekiĝas, kaj lia interno estas malplena; kaj kiel
soifanto sonĝas, ke li trinkas, sed li vekiĝas, kaj li
estas senforta kaj lia animo forte soifas: tiel estos kun
la multego de ĉiuj popoloj, kiuj batalos kontraŭ la
monto Cion. 9 Haltu kaj miru, ŝajnigu vin blindaj kaj
blindiĝu. Ili ebriiĝis, sed ne de vino; ili ŝanceliĝas,
sed ne de drinkaĵo. 10 Ĉar la Eternulo verŝis sur vin
spiriton de profunda dormo kaj fermis viajn okulojn,
vualis la profetojn kaj viajn estrojn, la viziistojn. 11
Kaj ĉia vizio estos por vi kiel la vortoj de libro sigelita,
kiun oni donas al homo, kiu povoscias legi, dirante al
li: Volu legi ĉi tion; sed li respondas: Mi ne povas, ĉar
ĝi estas sigelita. 12 Sed kiam oni donas la libron al
homo, kiu ne povoscias legi, dirante al li: Volu legi
ĉi tion, li respondas: Mi ne povoscias legi. 13 Kaj la
Sinjoro diris: Ĉar ĉi tiu popolo alproksimiĝas per sia
buŝo kaj honoras Min per siaj lipoj, sed ilia koro estas
malproksime de Mi, kaj ilia timo antaŭ Mi estas nur
lernita ordono de homoj: 14 tial Mi plue agos mirinde
kun ĉi tiu popolo, Mi agos tre mirinde; kaj pereos la
saĝeco de ĝiaj saĝuloj, kaj la kompetenteco de ĝiaj
kompetentuloj malaperos. 15 Ve al tiuj, kiuj profunde
kaŝas antaŭ la Eternulo la intencojn, kaj kies faroj
estas en mallumo, kaj kiuj diras: Kiu nin vidas? kaj kiu
scias pri ni? 16 Ho, via perverseco! Ĉu la potfaristo
estas rigardata kiel egala al la argilo? ĉu faritaĵo diras
pri sia farinto: Li min ne faris? kaj ĉu kreitaĵo diras
pri sia kreinto: Li ne estas kompetenta? 17 Sed jen
baldaŭ, post mallonga tempo, Lebanon aliformiĝos
en fruktoportan kampon, kaj la fruktoporta kampo
estos rigardata kiel arbaro. 18 Kaj en tiu tago la
surduloj aŭdos la vortojn de la libro, kaj la okuloj
de la blinduloj ekvidos tra mallumo kaj nokto. 19
Kaj la mizeruloj havos grandan ĝojon en la Eternulo,
kaj la homoj malriĉaj triumfos en la Sanktulo de
Izrael. 20 Ĉar malaperos premanto, kaj ne plu ekzistos
blasfemanto, kaj ekstermitaj estos ĉiuj zorgantoj pri
malbonagoj, 21 kiuj pekigas homojn per vorto kaj
faras insidojn kontraŭ juĝopetanto ĉe la pordego kaj
trompe forpuŝas justulon. 22 Pro tio tiele diris pri la
domo de Jakob la Eternulo, kiu elaĉetis Abrahamon:
Nun Jakob ne hontos, kaj nun lia vizaĝo ne paliĝos. 23
Ĉar kiam li vidos meze de si siajn infanojn, la faron de
Miaj manoj, ili honoros Mian nomon kaj honoros la
Sanktulon de Jakob kaj respektos la Dion de Izrael.
24 Kaj la spirite-erarantoj ricevos prudenton, kaj la
malpacemuloj akceptos instruon.

**30** Ve al la filoj malobeemaj, diras la Eternulo, kiuj
faras interkonsilojn, sed sen Mi, kaj aranĝas
interkonsentojn, sed sen Mia spirito, por aligi pekon
al peko, 2 kaj kiuj iras Egiptujon, ne demandinte Mian
buŝon, por defendi sin per defendo de Faraono kaj
kaŝi sin en la ombro de Egiptujo! 3 Sed la defendo de
Faraono estos por vi honto, kaj la kaŝiĝo en la ombro
de Egiptujo — malhonoro. 4 Ĉar liaj princoj estis en
Coan, kaj liaj senditoj venis en Ĥaneson. 5 Ĉiuj hontos
pro la popolo, kiu ne servis al ili por helpo, nek por
utilo, sed nur por honto kaj malhonoro. 6 Jen oni
vidas ŝarĝojn sur bestoj en sudo, en lando de mizero
kaj suferoj, kie estas leonino kaj leono, vipuro kaj
fluganta serpento; ili forportas sur la dorso de junaj
azenoj siajn riĉaĵojn kaj sur la ĝibo de kameloj siajn
trezorojn al popolo, kiu ne povas utili. 7 La helpo de
la Egiptoj estas vanta kaj vana; tial Mi diris pri tio: Ili

fanfaronas, sidante hejme. 8 Nun iru, skribu tion al ili
sur tabelo kaj desegnu tion en libro, por ke tio restu
por la tempo estonta, por ĉiam, por eterne. 9 Ĉar tio
estas popolo malobeema, filoj mensogaj, filoj, kiuj ne
volas aŭskulti instruon de la Eternulo. 10 Ili diras al
la antaŭvidistoj: Ne antaŭvidu; kaj al la profetoj: Ne
profetu al ni la veron, parolu al ni flataĵojn, profetu al
ni gajaĵon; 11 flankiĝu for de la vojo, dekliniĝu de la
irejo, forigu de antaŭ ni la Sanktulon de Izrael. 12
Tial tiele diras la Sanktulo de Izrael: Ĉar vi malŝatas
tiun vorton kaj fidas maljustaĵon kaj trompon kaj
apogas vin sur ĉi tio: 13 tial ĉi tiu kulpo estos por vi
kiel fendo, minacanta disfalon kaj montranta sin sur
alta muro, kies falo estos subita, neatendita. 14 Kaj Li
frakasos ĝin, kiel oni frakasas argilan vazon, frakasos
senindulge, tiel ke en ĝiaj rompopecoj ne troviĝos
vazopeco, por preni fajron de la fajrujo aŭ ĉerpi akvon
el akvujo. 15 Ĉar tiele diras la Sinjoro, la Eternulo,
la Sanktulo de Izrael: Per pento kaj trankvileco vi
saviĝus, en kvieteco kaj fido estus via forto; sed vi
ne volis. 16 Vi diris: Ne, ni forkuros sur ĉevaloj;
tial vi forkuros; kaj: Sur rapiduloj ni forrajdos; tial
rapidaj estos viaj persekutantoj. 17 De la minaco
de unu forkuros tuta milo, de la minaco de kvin vi
ĉiuj forkuros, ĝis vi restos kiel signo sur la supro de
monto kaj kiel flago sur monteto. 18 Tial la Eternulo
atendos, antaŭ ol Li vin korfavoros, kaj tial Li leviĝos,
antaŭ ol Li vin kompatos; ĉar la Eternulo estas Dio
de juĝo; feliĉaj estas ĉiuj, kiuj fidas Lin. 19 Ĉar, ho
popolo de Cion, loĝantoj de Jerusalem, vi ne plu
ploros; Li korfavoros vin, kiam vi plorkrios; kiam Li
aŭdos vin, Li respondos al vi. 20 Kaj la Sinjoro donos
al vi panon en la mizero kaj akvon en la premado;
kaj ne plu kaŝiĝos viaj instruantoj, kaj viaj okuloj
vidos viajn instruantojn. 21 Kaj kiam vi dekliniĝos ĉu
dekstren, ĉu maldekstren, viaj oreloj aŭdos vortojn
diratajn malantaŭ vi: Jen estas la vojo, iru laŭ ĝi.
22 Kaj vi rigardos kiel malpuran la arĝentan tegon
de viaj statuoj kaj la oran kovron de viaj idoloj; vi
forĵetos ilin kiel malpuraĵon, vi diros al ili: For! 23
Kaj Li donos pluvon al via semo, kiun vi semos sur
la kampo, kaj panon, produkton de la tero, kaj ĝi
estos sukoplena kaj grasa; sur vasta paŝtejo paŝtiĝos
tiam viaj brutoj. 24 Kaj la bovoj kaj junaj azenoj,
kiuj prilaboros la teron, manĝos miksitan nutraĵon,
ŝutitan per kribrilo kaj ŝovelilo. 25 Kaj sur ĉiu alta
monto kaj sur ĉiu alta monteto estos riveroj, torentoj
da akvo, en la tago de la granda mortigado, kiam falos
la turoj. 26 Kaj la lumo de la luno estos kiel la lumo
de la suno, kaj la lumo de la suno estos sepoble pli
granda, kiel la lumo de sep tagoj, en tiu tempo, kiam
la Eternulo bandaĝos la difektojn de Sia popolo kaj
resanigos ĝiajn vundojn. 27 Jen la nomo de la Eternulo
venas de malproksime; Lia kolero flamas kaj estas
pezega; Lia buŝo estas plena de indigno, kaj Lia lango
estas kiel fajro ekstermanta; 28 kaj Lia spiro estas
kiel torento disverŝiĝinta, kiu atingas ĝis la kolo, por
trakribri la popolojn per kribrilo de pereo; kaj erariga
brido estos sur la makzeloj de la popoloj. 29 Kantado
estos ĉe vi, kiel en la nokto de celebrado de festo;
kaj kora ĝojo, kiel ĉe tiu, kiu iras kun fluto, por veni
sur la monton de la Eternulo al la Roko de Izrael.
30 Kaj la Eternulo aŭdigos Sian majestan voĉon, kaj
la pezon de Sia brako Li vidigos en bolanta kolero
kaj en flamo de ekstermanta fajro, en ventego kaj
pluvego kaj ŝtona hajlo. 31 Ĉar ektremos la Asiriano
de la voĉo de la Eternulo, kiu frapos lin per la vergo.
32 Kaj penetranta estos ĉiu ekbato per la bastono,
kiun la Eternulo faligos sur lin kun tamburinoj kaj
harpoj; kaj per bataloj senhaltaj Li batalos kontraŭ li.
33 Ĉar delonge estas preparita la bruligejo; ĝi estas
preta ankaŭ por la reĝo, profundigita, vastigita; ĝia
lignaro enhavas multe da fajro kaj ligno; la blovo de la
Eternulo ekbruligos ĝin kiel torenton da sulfuro.

**31** Ve al tiuj, kiuj iras Egiptujon, por serĉi helpon,
kaj esperas je ĉevaloj, kaj fidas ĉarojn, ĉar estas
multe da ili, kaj rajdantojn, ĉar ili estas fortaj; sed ili
ne rigardas al la Sanktulo de Izrael kaj ne demandas
la Eternulon. 2 Sed Li estas saĝa, kaj Li venigas
malfeliĉon, kaj Siajn vortojn Li ne reprenas; kaj Li
leviĝos kontraŭ la domo de la malpiuloj kaj kontraŭ
la helpanto de malbonagantoj. 3 La Egiptoj estas
ja homoj, ne Dio; kaj iliaj ĉevaloj estas karno, ne
spirito. Kiam la Eternulo etendos Sian manon, tiam
falpuŝiĝos la helpanto kaj falos la helpato, kaj ĉiuj
kune pereos. 4 Ĉar tiele diris al mi la Eternulo: Kiel
leono aŭ leonido blekegas super sia rabaĵo, kaj, se eĉ
oni kunevokus kontraŭ ĝin multon da paŝtistoj, ĝi ne
timas ilian voĉon kaj ne humiliĝas antaŭ ilia bruado,
tiel la Eternulo Cebaot malsupreniros, por batali pro
la monto Cion kaj pro ĝia altaĵo. 5 Kiel birdoj per siaj
flugiloj, tiel la Eternulo Cebaot defendos Jerusalemon,
defendos kaj savos, indulgos kaj liberigos. 6 Revenu al

Tiu, de kiu tiel profunde defalis la filoj de Izrael. 7
Ĉar en tiu tago ĉiu forĵetos siajn idolojn arĝentajn kaj
siajn idolojn orajn, kiujn viaj manoj faris al vi por
peko. 8 Kaj la Asiriano falos de glavo ne vira, kaj glavo
ne homa lin ekstermos; kaj li forkuros de glavo, kaj
liaj junuloj fariĝos tributo. 9 Kaj lia forto forkuros pro
timo, kaj liaj princoj ektremos antaŭ standardo, diras
la Eternulo, kies fajro estas sur Cion kaj kies fajrejo
estas en Jerusalem.

**32** Jen kun justeco regos reĝo, kaj princoj
administros laŭleĝe. 2 Kaj ĉiu estos kiel ŝirmilo
kontraŭ vento, kiel rifuĝejo kontraŭ pluvego, kiel
torentoj da akvo en la stepo, kiel ombro de peza roko
en lando dezerta. 3 La okuloj de vidantoj ne estos
fermitaj, kaj la oreloj de aŭdantoj atentos. 4 Kaj la
koro de senprudentuloj lernos scion, kaj la lango de
balbutantoj parolos rapide kaj klare. 5 Oni ne plu
nomos malnoblulon noblulo, kaj pri avarulo oni ne
plu diros, ke li estas bonfaranto. 6 Ĉar malnoblulo
parolas malnoblaĵon, kaj lia koro faras malbonagojn,
agante hipokrite kaj parolante pri la Eternulo
malveraĵon, senmanĝigante la animon de malsatanto
kaj forprenante trinkaĵon de soifanto. 7 La iloj de
malpiulo estas malbonaj; li havas intencojn malvirtajn,
por pereigi malriĉulojn per vortoj mensogaj, eĉ kiam
la senhavulo diras pravaĵon. 8 Sed noblulo havas
intencojn noblajn, kaj li restas en nobleco. 9 Virinoj
senzorgaj, leviĝu, aŭskultu mian voĉon; filinoj ne
pensantaj pri danĝero, atentu miajn vortojn. 10 Post
tagoj kaj jaro vi ektremos, ho senzorgulinoj; ĉar finita
estos la vinberrikolto, ne plu estos enkolektado de
fruktoj. 11 Maltrankviliĝu, ho senzorgaj; ektremu,
ne pensantaj pri danĝero; senvestigu kaj nudigu vin
kaj zonu la lumbojn. 12 Oni ploros pri la abundo, pri
la ĉarmaj kampoj, pri la fruktoriĉaj vinberĝardenoj.
13 Sur la tero de mia popolo kreskos pikarbustoj kaj
dornoj, ankaŭ sur ĉiuj domoj de gajeco de la brua
urbo. 14 Ĉar la palacoj estos forlasitaj, la bruo de la
urbo malaperos, la fortikaĵoj kaj turoj fariĝos por ĉiam
anstataŭaĵo de kavernoj, ĝojloko por sovaĝaj azenoj,
paŝtiĝejo por brutaroj; 15 ĝis verŝiĝos sur nin spirito
de supre kaj la dezerto fariĝos fruktodona kampo
kaj la fruktodona kampo estos rigardata kiel arbaro.
16 Kaj justeco ekloĝos en la dezerto, kaj vero sidos
sur la fruktodona kampo. 17 Kaj produkto de justeco
estos paco, kaj akiro de justeco estos trankvileco kaj
sendanĝereco por ĉiam. 18 Kaj mia popolo loĝos en
loĝejo paca kaj en sidejoj sendanĝeraj kaj en ripozejoj
senzorgaj, 19 kaj disŝutiĝos kiel hajlo sur la deklivoj
de arbaro, kaj malsupre en la valo etendiĝos la urbo.
20 Feliĉaj estas vi, kiuj semas super ĉiu akvo, kiuj lasas
en libereco la piedojn de la bovo kaj de la azeno.

**33** Ve al vi, kiu rabas kaj mem ne estas prirabita,
kaj kiu perfidas kaj mem ne estas perfidita!
Kiam vi finos la rabadon, vi mem estos prirabita;
kiam vi ĉesos perfidi, vi mem estos perfidita. 2 Ho
Eternulo, korfavoru nin! je Vi ni esperas; estu ilia
brako ĉiumatene kaj nia savo en la tempo de mizero. 3
De la sono de tondro forkuris popoloj, de Via majesto
diskuris gentoj. 4 Kaj kolektita estos via rabakiro,
kiel kolektas vermoj; kaj oni kuros post ĝi, kiel kuras
akridoj. 5 La Eternulo altiĝis, ĉar Li loĝas alte; Li
plenigas Cionon per justeco kaj vero. 6 Saĝo kaj scio,
forto de via savo, estos la garantiaĵo de via estonteco;
timo antaŭ la Eternulo estos lia trezoro. 7 Jen iliaj
fortuloj plorkrias ekstere, la anoncantoj de paco ploras
maldolĉe; 8 la vojoj senhomiĝis, vojiranto jam ne
pasas; li rompis la interligon, malestimis la urbojn, ne
ŝatis la homojn. 9 Funebras, malĝojas la tero; hontigita
estas Lebanon kaj velkas; Ŝaron fariĝis kiel dezerto;
Baŝan kaj Karmel senfoliiĝis. 10 Nun Mi stariĝos,
diras la Eternulo; nun Mi altiĝos, nun Mi leviĝos. 11
Vi, gravedaj per fojno, naskos pajlon; via spiro estos
fajro, kiu vin ekstermos. 12 Kaj la popoloj estos kiel
bruligita kalko, kiel dornoj dehakitaj ili forbrulos en
fajro. 13 Aŭskultu, malproksimuloj, kion Mi faris;
kaj ekkonu, proksimuloj, Mian forton. 14 Ektimos la
pekuloj sur Cion, tremo kaptos la hipokritulojn: Kiu el
ni eltenos ĉe la ekstermanta fajro? kiu el ni eltenos ĉe
la eterna ardego? 15 Kiu agas juste kaj parolas veron,
abomenas profiton rabitan, forskuas siajn manojn,
por ne preni subaĉeton, ŝtopas siajn orelojn, por ne
aŭskulti aferojn sangajn, kaj fermas siajn okulojn,
por ne rigardi malbonon, 16 tiu loĝos sur la altaĵoj;
fortikaĵoj el rokoj estos lia defendo; pano estos donita
al li, akvon li havos konstante. 17 Viaj okuloj vidos la
reĝon en lia majesto, ili rigardos landon vastan. 18 Via
koro rememoros la teruraĵon: Kie estas la kalkulanto?
kie estas la pesanto? kie estas la kontrolanto de la
turoj? 19 La popolon arogantan vi ne vidos, la popolon
kun lingvo malklara kaj nedistingebla, kun lingvo
balbuta kaj nekomprenebla. 20 Rigardu Cionon, la
urbon de niaj kunvenoj; viaj okuloj vidos Jerusalemon,

loĝlokon trankvilan, tendon ne forigotan; neniam
estos eltirataj ĝiaj stangoj, kaj neniu el ĝiaj ŝnuroj
disŝiriĝos. 21 Ĉar tie la forto de la Eternulo estos por
ni anstataŭ riveroj, larĝaj lagoj; ŝipo kun remiloj ne
iros sur ili, kaj potenca ŝipo ilin ne trapasos. 22 Ĉar
la Eternulo estas nia juĝanto, la Eternulo estas nia
leĝdonanto, la Eternulo estas nia reĝo; Li helpos nin.
23 Viaj ŝnuregoj malfortiĝis; ili jam ne alfortikigas la
maston, ne streĉas la velon. Tiam estos dividata la
granda rabakiro; eĉ lamuloj iros kapti rabaĵon. 24 Kaj
ne diros la loĝanto: Mi estas malsana; al la popolo, kiu
tie loĝas, estas pardonita la kulpo.

34 Alproksimiĝu, popoloj, por aŭskulti; kaj atentu,
ho gentoj; aŭskultu la tero, kaj ĉio, kio ĝin
plenigas, la mondo kaj ĉiuj ĝiaj produktoj. 2 Ĉar
indignas la Eternulo kontraŭ ĉiuj popoloj kaj flame
koleras kontraŭ ilia tuta anaro; Li kondamnis ilin,
eldonis ilin al buĉado. 3 Kaj iliaj mortigitoj estos
disĵetitaj, kaj iliaj kadavroj eligos malbonodoron, kaj
la montoj trapenetriĝos de ilia sango. 4 Kaj velkos la
tuta estaĵaro de la ĉielo, kaj la ĉielo kuneruliĝos kiel
skribrulaĵo; kaj ĝia tuta estaĵaro defalos, kiel defalas
folio de vinberbranĉo kaj velkintaĵo de figarbo. 5 Ĉar
Mia glavo ebriiĝis en la ĉielo; jen ĝi malsupreniras sur
Edomon kaj sur Mian kondamnitan popolon, por fari
juĝon. 6 La glavo de la Eternulo estas plena de sango,
grasiĝis de sebo, de sango de ŝafoj kaj kaproj, de sebo
de ŝafaj renoj; ĉar buĉoferadon la Eternulo aranĝos en
Bocra kaj grandan buĉadon en la lando de Edom. 7
Kaj falos bubaloj kun ili, kaj bovoj junaj kun bovoj
grasigitaj, kaj ilia tero estos saturita de sango, kaj ilia
polvo estos grasigita de sebo. 8 Ĉar tio estas tago de
venĝo de la Eternulo, jaro de repago pro la juĝafero
de Cion. 9 Kaj liaj riveroj aliformiĝos en peĉon kaj
lia polvo en sulfuron, kaj lia tero fariĝos brulanta
peĉo. 10 Nek tage nek nokte ĝi estingiĝos, eterne
leviĝados ĝia fumo; de generacio al generacio ĝi restos
dezerta, en eterneco neniu iros sur ĝi. 11 Ekposedos
ĝin pelikano kaj botaŭro, kaj gufo kaj korvo loĝos sur
ĝi; kaj Li etendos super ĝi rektoŝnuron de ruinigo
kaj vertikalon de detruo. 12 Ĝi ne havos potenculojn,
kiuj povus tie proklami regnon, kaj ĉiuj ĝiaj princoj
malaperos. 13 Kaj en ĝiaj palacoj kreskos dornoj kaj
urtikoj, kaj sur ĝiaj fortikaĵoj kreskos pikarbustoj; kaj
ĝi estos loĝejo de ŝakaloj, spaco por strutoj. 14 Kaj
renkontiĝos tie sovaĝaj katoj kun sovaĝaj hundoj,
kaj virkaproj krios unu al alia; nur strigo tie nestos
kaj trovos por si ripozejon. 15 Tie nestos saltanta
serpento kaj metos ovojn kaj kovos kaj kolektos en
sia ombro; tie milvoj kolektiĝos unu al alia. 16 Serĉu
en la libro de la Eternulo, kaj legu: eĉ unu el ili ne
mankos, unu ne sentos foreston de alia; ĉar Lia buŝo
tion ordonis kaj Lia spirito tion kolektas. 17 Kaj Li
mem lotumis por ili, kaj Lia mano dividis por ili laŭ
rektoŝnuro; ili heredos tion por ĉiam, de generacio al
generacio ili loĝos tie.

35 Ekĝojos la dezerto kaj la senakvejo, triumfos la
stepo kaj ekfloros kiel lilio. 2 Ĝi forte ekfloros
kaj triumfos, triumfos kaj kantos; la gloro de Lebanon
estos donita al ĝi, la beleco de Karmel kaj Ŝaron; ili
vidos la gloron de la Eternulo, la majeston de nia
Dio. 3 Fortigu la senfortiĝintajn manojn, kaj fortikigu
la ŝanceliĝantajn genuojn. 4 Diru al tiuj, kiuj estas
senkuraĝigitaj en la koro: Tenu vin forte, ne timu; jen
estas via Dio! venos venĝo, repago de Dio; Li mem
venos kaj helpos vin. 5 Tiam malkovriĝos la okuloj de
la blinduloj, kaj la oreloj de la surduloj malfermiĝos. 6
Tiam la lamulo eksaltos kiel cervo, kaj la lango de la
mutulo ekkantos; ĉar en la dezerto elfendiĝos akvo kaj
en la stepo riveroj. 7 Kaj la fantoma lago fariĝos reala,
kaj la tero senakva fariĝos fonto de akvo; la loĝloko
de ŝakaloj fariĝos loko por kano kaj junko. 8 Kaj estos
tie irejo kaj vojo, kaj ĝi estos nomata Vojo Sankta;
malpurulo ne iros sur ĝi, ĉar nur al ili ĝi apartenas;
irante sur tiu vojo, eĉ malsaĝuloj ne eraros. 9 Ne estos
tie leono, kaj rabobesto ne aperos sur ĝi, ne troviĝos
tie; iros nur savitoj. 10 Kaj la elaĉetitoj de la Eternulo
revenos kaj iros sur Cionon kun kantado, kaj ĝojo
eterna estos super ilia kapo; ĝojon kaj gajecon ili
atingos, kaj forflugos afliktoj kaj ĝemado.

36 Tio estis en la dek-kvara jaro de la reĝo Ĥizkija,
eliris Sanĥerib, reĝo de Asirio, kontraŭ ĉiujn
fortikigitajn urbojn de Judujo, kaj venkoprenis ilin.
2 Kaj la reĝo de Asirio sendis Rabŝaken el Laĥiŝ en
Jerusalemon al la reĝo Ĥizkija kun granda militistaro;
kaj li stariĝis ĉe la akvotubo de la supra lageto, ĉe la
vojo de la kampo de fulistoj. 3 Kaj eliris al li Eljakim,
filo de Ĥilkija, la palacestro, kaj Ŝebna, la skribisto, kaj
Joaĥ, filo de Asaf, la kronikisto. 4 Kaj Rabŝake diris al
ili: Diru al Ĥizkija: Tiele diras la granda reĝo, la reĝo
de Asirio: Kio estas la fido, kiun vi fidas? 5 Mi opinias,
ke tio estas nur buŝa babilado; por milito oni bezonas

konsilon kaj forton. Nun kiun vi fidas, ke vi ribelis
kontraŭ mi? 6 Jen vi fidas la apogon de Egiptujo, tiu
kano rompita, kiu, se iu sin apogas sur ĝi, eniras en
lian manon kaj trapikas ĝin. Tia estas Faraono, reĝo
de Egiptujo, por ĉiuj, kiuj fidas lin. 7 Eble vi diros al
mi: La Eternulon, nian Dion, ni fidas? Sed Li estas ja
Tiu, kies altaĵojn kaj altarojn Ĥizkija forigis, dirante al
Judujo kaj Jerusalem: Antaŭ ĉi tiu altaro adorkliniĝu. 8
Nun provu konkuri kun mia sinjoro, la reĝo de Asirio;
mi donos al vi du mil ĉevalojn — ĉu vi povas trovi
rajdantojn por ili? 9 Kiel vi povas forigi estron, unu el
la plej malgrandaj servantoj de mia sinjoro, kaj fidi
Egiptujon pro la ĉaroj kaj rajdistoj? 10 Cetere, ĉu sen
la volo de la Eternulo mi iris kontraŭ ĉi tiun landon,
por ruinigi ĝin? La Eternulo diris al mi: Iru kontraŭ ĉi
tiun landon kaj ruinigu ĝin. 11 Tiam Eljakim kaj Ŝebna
kaj Joaĥ diris al Rabŝake: Volu paroli al viaj sklavoj
en la lingvo Siria, ĉar ni komprenas; sed ne parolu al
ni Jude antaŭ la oreloj de la popolo, kiu estas sur la
murego. 12 Sed Rabŝake diris: Ĉu al via sinjoro kaj al vi
sendis min mia sinjoro, por diri tiujn vortojn? ĉu ne
al la homoj, kiuj sidas sur la murego, por manĝi sian
ekskrementon kaj trinki sian urinon kune kun vi? 13
Kaj Rabŝake stariĝis, kaj ekkriis per laŭta voĉo Jude,
dirante: Aŭskultu la vortojn de la granda reĝo, la reĝo
de Asirio. 14 Tiele diras la reĝo: Ĥizkija ne forlogu
vin; ĉar li ne povos savi vin. 15 Kaj Ĥizkija ne fidigu
vin per la Eternulo, dirante: La Eternulo certe nin
savos, ĉi tiu urbo ne estos transdonita en la manojn
de la reĝo de Asirio. 16 Ne aŭskultu Ĥizkijan; ĉar tiele
diras la reĝo de Asirio: Faru kun mi pacon kaj eliru al
mi, kaj manĝu ĉiu el sia vinberĝardeno kaj ĉiu de sia
figarbo kaj trinku ĉiu la akvon de sia puto; 17 ĝis mi
venos kaj prenos vin en landon similan al via lando,
en landon de greno kaj mosto, en landon de pano kaj
vinberĝardenoj. 18 Ĥizkija ne forlogu vin per la vortoj:
La Eternulo nin savos. Ĉu la dioj de la nacioj savis ĉiu
sian landon el la manoj de la reĝo de Asirio? 19 Kie
estas la dioj de Ĥamat kaj Arpad? kie estas la dioj de
Sefarvaim? kaj ĉu ili savis Samarion el miaj manoj?
20 Kiu el ĉiuj dioj de tiuj landoj savis sian landon el
miaj manoj, ke la Eternulo savu Jerusalemon el miaj
manoj? 21 Kaj ili silentis kaj nenion respondis al li;
ĉar estis ordono de la reĝo: Ne respondu al li. 22 Kaj
Eljakim, filo de Ĥilkija, la palacestro, kaj Ŝebna, la
skribisto, kaj Joaĥ, filo de Asaf, la kronikisto, venis al
Ĥizkija en disŝiritaj vestoj, kaj raportis al li la vortojn
de Rabŝake.

**37** Kiam la reĝo Ĥizkija tion aŭdis, li disŝiris siajn
vestojn kaj ĉirkaŭkovris sin per sako, kaj iris en
la domon de la Eternulo. 2 Kaj li sendis Eljakimon,
la palacestron, kaj Ŝebnan, la skribiston, kaj la
plejaĝulojn de la pastroj, ĉirkaŭkovritajn per sakoj,
al la profeto Jesaja, filo de Amoc. 3 Kaj ili diris al li:
Tiele diras Ĥizkija: Ĉi tiu tago estas tago de malfeliĉo,
de puno, kaj de malhonoro; ĉar infanoj atingis la
aperturon de la utero, sed forestas forto por naski. 4
Eble aŭdos la Eternulo, via Dio, la vortojn de Rabŝake,
kiun sendis la reĝo de Asirio, lia sinjoro, por blasfemi
la vivantan Dion, kaj insulti per la vortoj, kiujn aŭdis
la Eternulo, via Dio. Levu do preĝon por la restintoj,
kiuj ankoraŭ ekzistas. 5 Kaj la servantoj de la reĝo
Ĥizkija venis al Jesaja. 6 Kaj Jesaja diris al ili: Tiele
parolu al via sinjoro: Tiele diras la Eternulo: Ne timu
la vortojn, kiujn vi aŭdis kaj per kiuj blasfemis Min la
servantoj de la reĝo de Asirio. 7 Jen Mi metos en lin
spiriton, ke, aŭdinte sciigon, li reiros en sian landon;
kaj Mi faligos lin per glavo en lia lando. 8 Kaj Rabŝake
revenis, kaj trovis la reĝon de Asirio militanta kontraŭ
Libna; ĉar li aŭdis, ke li foriris de Laĥiŝ. 9 Kaj venis
sciigo pri Tirhaka, reĝo de Etiopujo, nome: Li eliris,
por militi kontraŭ vi. Kiam li tion aŭdis, li sendis
senditojn al Ĥizkija kun la sekvanta komisio: 10 Tiele
diru al Ĥizkija, reĝo de Judujo: Ne forlogu vin via Dio,
kiun vi fidas, dirante: Jerusalem ne estos transdonita
en la manojn de la reĝo de Asirio. 11 Vi aŭdis ja, kion
faris la reĝoj de Asirio al ĉiuj landoj, ruiniginte ilin;
ĉu vi do saviĝos? 12 Ĉu ilin savis la dioj de la nacioj,
kiujn ekstermis miaj patroj, la naciojn de Gozan kaj
Ĥaran kaj Recef kaj la filojn de Eden en Telasar? 13
Kie estas la reĝo de Ĥamat kaj la reĝo de Arpad kaj
la reĝo de la urbo Sefarvaim, de Hena kaj Iva? 14
Ĥizkija prenis la leteron el la manoj de la senditoj
kaj legis ĝin, kaj li iris en la domon de la Eternulo,
kaj Ĥizkija disvolvis ĝin antaŭ la Eternulo. 15 Kaj
Ĥizkija ekpreĝis al la Eternulo, dirante: 16 Ho Eternulo
Cebaot, Dio de Izrael, sidanta sur la keruboj! Vi estas
la sola Dio super ĉiuj regnoj de la tero, Vi kreis la
ĉielon kaj la teron; 17 klinu, ho Eternulo, Vian orelon,
kaj aŭskultu; malfermu, ho Eternulo, Viajn okulojn,
kaj rigardu; kaj aŭdu ĉiujn vortojn de Sanĥerib, kiujn
li sendis, por insulti la Dion vivantan. 18 Estas vero,

ho Eternulo, la reĝoj de Asirio ruinigis ĉiujn regnojn
kaj ilian teron, 19 kaj ĵetis iliajn diojn en fajron; ĉar tio
estis ne dioj, sed faritaĵoj de homaj manoj, ligno kaj
ŝtono, ili ekstermis ilin. 20 Sed nun, ho Eternulo, nia
Dio, savu nin kontraŭ liaj manoj, por ke ĉiuj regnoj de
la tero eksciu, ke Vi, ho Eternulo, estas sola. 21 Kaj
Jesaja, filo de Amoc, sendis al Ĥizkija, por diri: Tiele
diras la Eternulo, Dio de Izrael: Koncerne tion, kion
vi preĝis al Mi pri SanĤerib, reĝo de Asirio, 22 jen
estas tio, kion diris pri li la Eternulo: Malestimas vin,
mokas vin la virga filino de Cion, balancas post vi
la kapon la filino de Jerusalem. 23 Kiun vi blasfemis
kaj insultis? kaj kontraŭ kiun vi laŭtigis voĉon kaj
alte levis viajn okulojn? Kontraŭ la Sanktulon de
Izrael! 24 Per viaj servantoj vi blasfemis la Sinjoron,
kaj vi diris: Kun mia multo da ĉaroj mi supreniris
sur la supron de montoj, sur la randon de Lebanon,
kaj mi dehakis ĝiajn altajn cedrojn, ĝiajn plej bonajn
cipresojn, kaj mi atingis ĝian plej altan pinton, ĝian
ĝardensimilan arbaron. 25 Mi fosis kaj trinkis akvon,
kaj mi sekigos per la plandoj de miaj piedoj ĉiujn
riverojn de Egiptujo. 26 Ĉu vi ne aŭdis, ke Mi jam de
longe tion decidis, de tempo antikva tion destinis?
nun Mi tion plenumis, ke la fortikigitaj urboj fariĝis
amaso da ruinŝtonoj. 27 Kaj iliaj loĝantoj senfortigitaj
ektremis kaj kovriĝis per honto; ili fariĝis kiel herbo
de kampo, kiel malgrava verdaĵo, kiel musko sur
tegmentoj, kaj kiel sunbruligita greno antaŭ la spikiĝo.
28 Sed vian sidon kaj vian eliron kaj vian venon Mi
scias, ankaŭ vian koleron kontraŭ Mi. 29 Pro tio, ke vi
koleris kontraŭ Mi kaj via aroganteco venis al Miaj
oreloj, Mi metos Mian ringon en viajn nazotruojn kaj
Mian buŝbridaĵon en vian buŝon, kaj Mi reirigos vin
per la sama vojo, per kiu vi venis. 30 Kaj jen estas
por vi la pruvosigno: vi manĝos en ĉi tiu jaro grenon
memsemiĝintan, en la dua jaro grenon sovaĝan,
sed en la tria jaro vi semos kaj rikoltos kaj plantos
vinberĝardenojn kaj manĝos iliajn fruktojn. 31 Kaj
la restaĵo de la domo de Jehuda denove enradikiĝos
malsupre kaj donos fruktojn supre. 32 Ĉar el Jerusalem
devenos restaĵo, kaj savitaĵo de la monto Cion; la
fervoro de la Eternulo Cebaot tion faros. 33 Tial tiele
diras la Eternulo pri la reĝo de Asirio: Li ne eniros en
ĉi tiun urbon kaj ne ĵetos tien sagon kaj ne aliros al ĝi
kun ŝildo kaj ne ŝutos kontraŭ ĝi remparon. 34 Per
la sama vojo, per kiu li venis, li reiros, kaj en ĉi tiun
urbon li ne eniros, diras la Eternulo. 35 Mi defendos ĉi
tiun urbon, por savi ĝin pro Mi kaj pro Mia servanto
David. 36 Kaj eliris anĝelo de la Eternulo kaj frapis
en la tendaro de la Asirianoj cent okdek kvin mil.
Kiam oni leviĝis matene, oni ekvidis, ke ili ĉiuj estas
kadavroj senvivaj. 37 Kaj SanĤerib, la reĝo de Asirio,
elmoviĝis kaj iris kaj rehejmiĝis kaj restis en Nineve.
38 Kaj kiam li adorkliniĝis en la domo de sia dio NisroĤ,
liaj filoj AdrameleĤ kaj Ŝarecer mortigis lin per glavo,
kaj mem ili forkuris en la landon Araratan. Kaj ekreĝis
anstataŭ li lia filo Esar-Ĥadon.

**38** En tiu tempo Ĥizkija morte malsaniĝis; kaj venis
al li la profeto Jesaja, filo de Amoc, kaj diris al
li: Tiele diras la Eternulo: Faru testamenton pri via
domo, ĉar vi mortos kaj ne vivos. 2 Tiam Ĥizkija turnis
sian vizaĝon al la muro, kaj ekpreĝis al la Eternulo,
3 kaj diris: Mi petas, ho Eternulo, rememoru, ke mi
iradis antaŭ Vi kun vero kaj koro fidela, kaj mi faradis
tion, kio plaĉas al Vi. Kaj Ĥizkija laŭte ekploris. 4
Tiam aperis la vorto de la Eternulo al Jesaja jene: 5
Iru, kaj diru al Ĥizkija: Tiele diras la Eternulo, Dio
de via patro David: Mi aŭdis vian preĝon, Mi vidis
viajn larmojn; jen Mi aldonos al via vivo dek kvin
jarojn. 6 Kaj kontraŭ la mano de la reĝo de Asirio
Mi savos vin kaj ĉi tiun urbon, kaj Mi defendos ĉi
tiun urbon. 7 Kaj jen estas por vi la pruvosigno de la
Eternulo, ke la Eternulo plenumos tion, kion Li diris:
8 jen la hormontran ombron, kiu malsupriĝis sur la
suna hormontrilo de AĤaz, Mi retiros malantaŭen je
dek gradoj. Kaj la suno retiriĝis je dek gradoj laŭ la
gradaro, laŭ kiu ĝi malsupriĝis. 9 Jen estas la skribo
de Ĥizkija, reĝo de Judujo, kiam li malsaniĝis kaj eliris
viva el sia malsano: 10 Mi pensis, ke en la mezo de mia
vivo mi malsupreniros en la pordegon de Ŝeol, Ke mi
estos senigita je la resto de miaj jaroj; (Sheol h7585) 11 Mi
pensis, ke mi ne plu vidos Dion, la Eternulon, sur la
tero de la vivantoj, Ke mi ne plu rigardos homon inter
la loĝantoj de la vantejo; 12 Ke mia estado demoviĝas,
kaj forportiĝas de mi kiel tendo de paŝtisto; Ke mi
finteksis mian vivon kiel teksisto, kaj Li detranĉos
min de la teksbazo; Ke antaŭ ol la tago cedos al la
nokto, Vi faros al mi finon. 13 Mi atendis ĝis mateno,
ke simile al leono Li frakasos ĉiujn miajn ostojn, Ke
antaŭ ol la tago cedos al la nokto, Vi faros al mi finon.
14 Kiel hirundo plendanta mi plorpepis, mi ĝemis kiel
kolombo; Miaj okuloj estis direktitaj malsupren: Ho
Eternulo, mi suferas, protektu min! 15 Kion mi diru?

Li promesis ja al mi, kaj Li faris. Nun mi pasigos ĉiujn
miajn jarojn, memorante la premitecon de mia animo.
16 Ho Sinjoro, per tio vivas la homoj, Kaj en ĉio ĉi
tio estas la vivo de mia spirito: Vi resanigis min, kaj
konservis al mi la vivon. 17 Jen en bonon aliformiĝis
mia sufero; Vi ame eltiris mian animon el pereo, Ĉar
Vi ĵetis malantaŭ Vin ĉiujn miajn pekojn. 18 Ĉar ne
Ŝeol Vin gloros, ne la morto Vin laŭdos; La irantaj en
la terinternon ne esperos Vian verecon. (Sheol h7585) 19
La vivanto, nur la vivanto Vin gloros, kiel mi hodiaŭ;
Patro al la filoj konigos Vian verecon. 20 La Eternulo
min helpas; Kaj miajn kantojn ni kantados Dum nia
tuta vivo en la domo de la Eternulo. 21 Kaj Jesaja
diris: Oni alportu dispremitan figon kaj metu sur la
ŝvelaĵon, kaj li estos sanigita. 22 Kaj Ĥizkija diris: Kia
estas la signo, ke mi iros en la domon de la Eternulo?

**39** En tiu tempo Merodaĥ-Baladan, filo de Baladan,
reĝo de Babel, sendis leteron kaj donacojn al
Ĥizkija; ĉar li aŭdis, ke li estis malsana kaj resaniĝis.
2 Kaj Ĥizkija ĝojis pri ili, kaj montris al ili sian
trezorejon, la arĝenton kaj la oron kaj la aromaĵojn
kaj la karan oleon kaj sian tutan armilejon, kaj ĉion,
kio troviĝis en liaj trezorejoj; estis nenio, kion Ĥizkija
ne montrus al ili en sia domo kaj en sia tuta posedaĵo.
3 Kaj venis la profeto Jesaja al la reĝo Ĥizkija, kaj diris
al li: Kion parolis tiuj homoj? kaj de kie ili venis al
vi? Kaj Ĥizkija diris: El lando malproksima ili venis al
mi, el Babel. 4 Kaj li diris: Kion ili vidis en via domo?
Kaj Ĥizkija respondis: Ĉion, kio estas en mia domo, ili
vidis; estis nenio, kion mi ne montrus al ili en miaj
trezorejoj. 5 Tiam Jesaja diris al Ĥizkija: Aŭskultu
la diron de la Eternulo Cebaot: 6 Jen venos tagoj,
kaj ĉio, kio estas en via domo kaj kion kolektis viaj
patroj ĝis la nuna tago, estos forportata en Babelon;
nenio restos, diras la Eternulo. 7 Kaj el viaj filoj, kiuj
devenos de vi, kiujn vi naskigos, oni prenos; kaj ili
estos korteganoj en la palaco de la reĝo de Babel. 8
Kaj Ĥizkija diris al Jesaja: Bona estas la vorto de la
Eternulo, kiun vi diris. Kaj li diris plue: Estu nur paco
kaj vero en mia tempo.

**40** Konsolu, konsolu Mian popolon, diras via Dio.
2 Parolu al la koro de Jerusalem, kaj voku al ĝi, ke
finiĝis la tempo de ĝia batalado, ke pardonita estas ĝia
kulpo, ke ĝi ricevis el la mano de la Eternulo duoble
pro ĉiuj siaj pekoj. 3 Sonas voĉo de krianto: Pretigu en
la dezerto la vojon de la Eternulo, rektigu en la stepo
irejon por nia Dio. 4 Ĉiu valo leviĝu, kaj ĉiu monto kaj
monteto malaltiĝu, kaj la malebenaĵo fariĝu ebenaĵo,
kaj la montaro fariĝu valo. 5 Kaj aperos la majesto de
la Eternulo; kaj ĉiu karno kune vidos, ke la buŝo de la
Eternulo parolis. 6 Voĉo diras: Proklamu! sed li diras:
Kion mi proklamu? Ĉiu karno estas herbo, kaj ĉiu
ĝia ĉarmo estas kiel kampa floreto. 7 Sekiĝas herbo,
velkas floreto, kiam la spiro de la Eternulo blovetas
sur ĝin; vere, la popolo estas herbo. 8 Sekiĝas herbo,
velkas floreto; sed la vorto de nia Dio restas eterne.
9 Sur altan monton supreniru, ho predikantino de
Cion; laŭtigu potence vian voĉon, ho predikantino de
Jerusalem, laŭtigu, ne timu; diru al la urboj de Judujo:
Jen estas via Dio! 10 Jen la Sinjoro, la Eternulo, venas
kun potenco, kaj Lia brako regas; jen Lia rekompenco
estas kun Li, kaj Lia repago antaŭ Li. 11 Kiel paŝtisto
Li paŝtos Sian ŝafaron, per Sia brako Li kolektos la
ŝafidojn kaj portos ilin sur Sia brusto; la suĉigantinojn
Li kondukos. 12 Kiu mezuris per sia mankavo la akvon
kaj difinis la ĉielon per la manlarĝo kaj metis en
mezurilon la polvon de la tero kaj pesis per pesilo
la montojn kaj la montetojn per pesiltaso? 13 Kiu
gvidis la spiriton de la Eternulo, kaj kiu donis al Li
sian konsilon? 14 De kiu Li petis konsilon, ke tiu
komprenigu Lin kaj instruu Lin pri la vojo de justeco
kaj instruu al Li scion kaj konigu al Li la vojon de
saĝeco? 15 Jen la popoloj estas kiel guto el sitelo kaj
kalkulataj kiel polvero sur pesiltaso; jen Li disŝutas la
insulojn, kiel polveretojn. 16 Lebanon ne sufiĉus por
fajro, kaj ĝia bestaro ne sufiĉus por bruloferoj. 17 Ĉiuj
nacioj estas antaŭ Li kiel nenio, estas rigardataj de
Li kiel nulo kaj senvaloraĵo. 18 Kun kiu vi komparos
Dion? kaj kian similaĵon vi kontraŭstarigos al Li? 19
Ĉu idolon, kiun fandis artisto kaj kiun oraĵisto kovras
per oro kaj ornamas per arĝentaj ĉenoj? 20 Kiu estas
tro malriĉa por la oferdono, tiu elektas lignon ne
putrantan, serĉas kompetentan skulptiston, por fari
idolon fortikan. 21 Ĉu vi ne scias? ĉu vi ne aŭdis? ĉu
ne estis dirite al vi antaŭlonge? ĉu vi ne komprenas
detempe de la fondado de la tero? 22 Li sidas super la
rondo de la tero, kaj ĝiaj loĝantoj estas kiel lokustoj;
Li etendas la ĉielon kiel maldikan teksaĵon kaj distiras
ĝin kiel tendon por loĝado; 23 Li faras la princojn
neniaĵo, la juĝistojn de la tero Li faras neekzistaĵo,
24 kvazaŭ ili ne estus plantitaj, kvazaŭ ili ne estus
semitaj, kvazaŭ ilia trunko ne havus radikon en la tero:
apenaŭ Li blovetis sur ilin, ili velkis, kaj la ventego

forportas ilin kiel pajlerojn. 25 Kaj al kiu do vi volas
egaligi Min, ke Mi estu simila al li? diras la Sanktulo.
26 Levu alten viajn okulojn, kaj rigardu, kiu kreis tion?
Li, kiu elkondukas iliajn taĉmentojn laŭ kalkulo, kiu
ilin ĉiujn vokas laŭ la nomo; antaŭ la Plejpotenculo
kaj Plejfortulo neniu kaŝiĝos. 27 Kial vi parolas, ho
Jakob, kaj diras, ho Izrael: Mia vojo estas kaŝita antaŭ
la Eternulo, kaj mia afero ne atingas Dion? 28 Ĉu vi ne
scias, ĉu vi ne aŭdis, ke la Eternulo estas Dio eterna,
la Kreinto de la finoj de la tero? Li ne laciĝas kaj ne
senfortiĝas; Lia saĝeco estas neesplorebla. 29 Li donas
forton al la laculo, kaj al la senfortulo Li plifortigas la
povon. 30 Knaboj senfortiĝas kaj laciĝas, junuloj ofte
falas; 31 sed tiuj, kiuj fidas la Eternulon, ricevas novan
forton, ili levas la flugilojn kiel agloj, ili kuras kaj ne
laciĝas, ili iras kaj ne senfortiĝas.

**41** Silentu antaŭ Mi, ho insuloj, kaj la popoloj
refortiĝu; ili alproksimiĝu kaj parolu; ni kune iru
al juĝo. 2 Kiu vekis el la oriento la justulon, vokis lin, ke
li iru? Li transdonis al li naciojn kaj detronigis reĝojn,
transdonis kiel polvon al lia glavo, kiel disflugantajn
pajlerojn al lia pafarko. 3 Li persekutas ilin, transiras
en paco la vojon, sur kiu liaj piedoj ne haltas. 4
Kiu tion faris kaj estigis? kiu vokis la generaciojn
de la komenco? Mi, la Eternulo, la unua, kaj kun la
lastaj Mi estas la sama. 5 Vidis tion la insuloj kaj
ektimis; la finoj de la tero ektremis; ili alproksimiĝis
kaj alvenis. 6 Ĉiu helpas sian proksimulon, kaj diras al
sia frato: Estu kuraĝa! 7 Kaj la skulptisto kuraĝigas la
fandiston, la ladfaristo la forĝiston, kaj li diras: La
kuniĝo estas bona; kaj li fortikigas tion per najloj,
ke ĝi ne ŝanceliĝu. 8 Sed vi, ho Mia servanto Izrael,
ho Jakob, kiun Mi elektis, ho idaro de Abraham, Mia
amato, 9 vi, kiun Mi prenis de la finoj de la tero
kaj vokis de ĝiaj randoj, kaj al kiu Mi diris: Vi estas
Mia servanto, Mi vin elektis kaj ne forpuŝis — 10
ne timu, ĉar Mi estas kun vi; ne maltrankviliĝu, ĉar
Mi estas via Dio; Mi vin fortigos, Mi vin helpos, Mi
vin subtenos per Mia justa dekstra mano. 11 Jen
hontiĝos kaj malhonoriĝos ĉiuj, kiuj koleras kontraŭ
vi; viaj kontraŭuloj fariĝos neniaĵo kaj pereos. 12
Vi serĉos ilin, sed vi ilin ne trovos, la homojn, kiuj
kverelas kontraŭ vi; la homoj, kiuj batalas kontraŭ vi,
fariĝos neniaĵo kaj neekzistaĵo. 13 Ĉar Mi, la Eternulo,
via Dio, fortigas vian dekstran manon, dirante al vi:
Ne timu, Mi vin helpos. 14 Ne timu, vermo Jakob,
malmultulo Izrael! Mi vin helpos, diras la Eternulo;
kaj via Liberiganto estas la Sanktulo de Izrael. 15 Jen
Mi faros vin draŝilo akra, nova, dentohava; vi draŝos
montojn kaj disfrotos, kaj montetojn vi faros kiel
grenventumaĵo. 16 Vi disĵetos ilin, kaj la vento ilin
disportos, kaj la ventego ilin disblovos; sed vi ĝojos en
la Eternulo, vi havos gloron en la Sanktulo de Izrael.
17 La malriĉuloj kaj senhavuloj serĉas akvon, sed ĝi ne
troviĝas; ilia lango sekiĝas de soifo. Mi, la Eternulo,
aŭskultos ilin; Mi, la Dio de Izrael, ne forlasos ilin. 18
Sur nudaj montetoj Mi malfermos riverojn kaj meze
de valoj fontojn, dezerton Mi faros lago da akvo kaj
sensukan teron fontoj de akvo. 19 En dezerto Mi
aperigos cedron, akacion, mirton, kaj olivarbon; Mi
starigos en stepo cipreson, abion, kaj bukson kune; 20
por ke ĉiuj vidu kaj eksciu kaj rimarku kaj komprenu,
ke la mano de la Eternulo tion faris kaj la Sanktulo de
Izrael tion kreis. 21 Prezentu vian juĝaferon, diras
la Eternulo; antaŭmetu viajn argumentojn, diras la
Reĝo de Jakob. 22 Ili alvenu, kaj diru al ni, kio fariĝos;
diru al ni, kion signifas tio, kio estis en la komenco,
tiam ni pripensos kaj ekscios la finon; aŭ sciigu al ni
tion, kio estos. 23 Diru al ni tion, kio venos poste, por
ke ni eksciu, ke vi estas dioj; ĉu vi faros bonon, ĉu
malbonon, ni miros kaj vidos kune. 24 Sed jen vi estas
neniaĵo, kaj via agado estas neniaĵo; abomenindaĵon
oni elektas en vi. 25 Iun Mi vekis el nordo, kaj li venis;
de la leviĝejo de la suno li proklamas Mian nomon; li
paŝas sur potenculoj kiel sur koto, kaj kiel potfaristo
piedpremas argilon. 26 Kiu tion diris antaŭe, por ke ni
sciu? kaj antaŭlonge, por ke ni diru: Li estas prava?
Sed neniu diris, kaj neniu sciigis, kaj neniu aŭdis viajn
vortojn. 27 Mi la unua diris al Cion: Jen ili estas; kaj
al Jerusalem Mi donis sciiganton. 28 Mi rigardis, kaj
neniu estis; inter ili estis neniu konsilanto, ke Mi povu
demandi kaj ili respondu. 29 Jen ili ĉiuj estas vantaĵo,
neniaĵo estas ilia faro, vento kaj senenhavaĵo estas
iliaj fanditaj idoloj.

**42** Jen estas Mia servanto, kiun Mi apogas, Mia
elektito, kiun favoras Mia animo. Mi metis Mian
spiriton sur lin; li disportos justecon al la nacioj. 2 Li
ne krios nek bruos, kaj ne aŭdigos sur la stratoj sian
voĉon. 3 Kanon rompetitan li ne rompos, kaj meĉon
senfajriĝantan li ne estingos. Laŭ la vero li faros juĝon.
4 Li ne laciĝos nek fleksiĝos, ĝis li starigos sur la tero
justecon; kaj lian instruon atendas la insuloj. 5 Tiele

diras Dio, la Eternulo, kiu kreis la ĉielon kaj etendis
ĝin, kiu disvastigis la teron kaj ĝiajn produktojn, kiu
donis animon sur ĝiaj loĝantoj, kaj spiriton al tiuj,
kiuj iras sur ĝi: **6** Mi, la Eternulo, alvokis vin por la
vero, kaj Mi prenos vin je la mano kaj gardos vin, kaj
faros vin interligo por la popolo, lumo por la nacioj,
**7** por malfermi okulojn blindajn, por elkonduki el
malliberejo malliberulojn, el domo ŝlosita sidantajn
en mallumo. **8** Mi estas la Eternulo, tia estas Mia
nomo; kaj Mian honoron Mi ne donos al alia, nek
Mian gloron al idoloj. **9** Kio antaŭlonge estis profetita,
jen ĝi plenumiĝis, kaj novajn aferojn Mi anoncas;
antaŭ ol ili elkreskos, Mi anoncos al vi. **10** Kantu al
la Eternulo kanton novan, Lian gloron de la rando
de la tero, vi, kiuj ŝipveturas sur la maro, kaj ĉio,
kio ĝin plenigas, insuloj kaj iliaj loĝantoj. **11** Laŭtigu
vian voĉon, ho dezerto kaj ĝiaj urboj, la vilaĝoj, en
kiuj loĝas Kedar; ĝojkriu la loĝantoj de Sela, de la
supro de montoj ili voku. **12** Ili donu honoron al la
Eternulo, kaj Lian gloron ili proklamu sur la insuloj.
**13** La Eternulo eliros kiel heroo, kiel homo de milito Li
vekos fervoron, Li vokos kaj aŭdigos militan krion, Li
montros Sian potencon sur Siaj malamikoj. **14** Longe
Mi silentis, estis kvieta, kaj detenis Min; nun Mi krios
kiel naskantino, Mi neniigos kaj englutos ĉion. **15**
Mi dezertigos montojn kaj montetojn, kaj ilian tutan
verdaĵon Mi elsekigos; Mi faros la riverojn insuloj, kaj
la lagojn Mi elsekigos. **16** Mi kondukos la blindulojn
laŭ vojo, kiun ili ne konas, laŭ irejoj por ili ne konataj
Mi irigos ilin; la mallumon antaŭ ili Mi faros lumo, kaj
la vojojn kurbajn rektaj. Tiajn aferojn Mi faros por
ili, kaj Mi ilin ne forlasos. **17** Retiros sin malantaŭen,
kovriĝos per honto tiuj, kiuj fidas idolojn, kaj kiuj
diras al fanditaĵoj: Vi estas niaj dioj. **18** Aŭskultu, ho
surduloj; kaj vi, blinduloj, rigardu, por ke vi vidu.
**19** Sed kiu estas tiel blinda, kiel Mia servanto, kaj
surda, kiel la sendato, kiun Mi sendas? kiu estas tiel
blinda, kiel Mia elaĉetito, kaj blinda, kiel la servanto
de la Eternulo? **20** Vi vidis multe, sed vi ne konservis;
viaj oreloj estas malfermitaj, sed ne aŭdas. **21** La
Eternulo deziris pro Sia justeco, ke Li faru la leĝon
granda kaj glora. **22** Sed tio estas popolo prirabita
kaj senhavigita; ili ĉiuj estas ligitaj en kavernoj kaj
kaŝitaj en malliberejoj; ili fariĝis rabakiro, kaj neniu
ilin savas, kaptitaĵo, kaj neniu diras: Redonu. **23** Kiu
el vi atentos ĉi tion, komprenos kaj aŭskultos por la
tempo estonta? **24** Kiu fordonis Jakobon por ruinigo
kaj Izraelon al la rabistoj? ĉu ne la Eternulo, kontraŭ
kiu ni pekis, ne volis iri laŭ Liaj vojoj kaj ne aŭskultis
Lian instruon? **25** Kaj Li elverŝis sur lin la ardon de Sia
kolero kaj la potencon de la milito; kaj Li faris brulon
ĉirkaŭe de li, sed li ne komprenis; Li ĵetis flamojn sur
lin, sed li ne prenis tion al sia koro.

**43** Sed nun tiele diras la Eternulo, kiu vin kreis, ho
Jakob, kaj kiu vin estigis, ho Izrael: Ne timu, ĉar
Mi vin savos; Mi vokos vin laŭ via nomo, vi estas Mia.
**2** Kiam vi transiros akvon, Mi estos kun vi, kaj trans
riverojn, ili vin ne dronigos; kiam vi iros en fajron,
vi ne brulvundiĝos, kaj flamo vin ne bruligos. **3** Ĉar
Mi estas la Eternulo, via Dio, la Sanktulo de Izrael,
via Savanto; Egiptujon Mi donos kiel vian elaĉeton,
Etiopujon kaj Seban anstataŭ vi. **4** Ĉar vi estas kara
en Miaj okuloj, vi estis honorita kaj Mi vin amas; tial
Mi fordonos aliajn homojn anstataŭ vi kaj gentojn
anstataŭ via animo. **5** Ne timu, ĉar Mi estas kun
vi; de la oriento Mi venigos vian idaron, kaj de la
okcidento Mi vin kolektos. **6** Mi diros al la nordo:
Redonu! kaj al la sudo: Ne retenu! venigu Miajn filojn
de malproksime kaj Miajn filinojn de la randoj de
la tero, **7** ĉiun, kiu estas nomata per Mia nomo kaj
kiun Mi kreis por Mia gloro, faris, kaj estigis. **8** Elirigu
la popolon blindan, kiu tamen havas okulojn, kaj la
surdulojn, kiuj tamen havas orelojn. **9** Ĉiuj nacioj
kolektiĝu kune, kaj la popoloj kunvenu; kiu el ili tion
antaŭdirus aŭ anoncus al ni antaŭlonge? ili starigu
siajn atestantojn kaj pravigu sin, por ke oni aŭdu, kaj
diru: Estas vero! **10** Vi estas Miaj atestantoj, diras la
Eternulo, kaj Mia servanto, kiun Mi elektis; por ke
vi sciu kaj kredu al Mi, kaj komprenu, ke tio estas
Mi; antaŭ Mi estis kreita nenia Dio, kaj post Mi ne
ekzistos. **11** Mi, Mi estas la Eternulo; kaj krom Mi
ekzistas nenia savanto. **12** Mi promesis kaj savis kaj
anoncis; kaj ne estis inter vi iu fremda; kaj vi estas
Miaj atestantoj, diras la Eternulo, kaj Mi estas Dio. **13**
De la komenco de la tempo Mi estas la sama, kaj neniu
povas savi kontraŭ Mia mano; kiam Mi faras, kiu tion
ŝanĝos? **14** Tiele diras la Eternulo, via Liberiganto, la
Sanktulo de Izrael: Pro vi Mi sendis en Babelon kaj
pelis malsupren ĉiujn forkurantojn, kaj la ĝojadon de
la Ĥaldeoj Mi aliformigis en ploradon. **15** Mi estas la
Eternulo, via Sanktulo, la Kreinto de Izrael, via Reĝo.
**16** Tiele diras la Eternulo, kiu faris vojon sur la maro
kaj vojeton sur potenca akvo, **17** kiu elirigis ĉarojn

kaj ĉevalojn, militistaron kaj potencon, kiuj ĉiuj kune
falis kaj ne leviĝos, senfajriĝis, estingiĝis kiel meĉo:
18 Ne rememoru tion, kio estis antaŭlonge, kaj ne
meditu pri tio, kio estis en la tempo antikva. 19 Jen
Mi faras ion novan, nun ĝi elkreskas; ĉu vi tion ne
komprenas? Mi faros vojon en la dezerto, riverojn en
senakva lando. 20 Gloros Min la bestoj de la kampo,
ŝakaloj kaj strutoj; ĉar Mi donis akvon en la dezerto,
riverojn en senakva lando, por trinkigi la popolon,
kiun Mi elektis, 21 tiun popolon, kiun Mi kreis por
Mi, por ke ĝi rakontu pri Mia gloro. 22 Sed ne Min vi
vokis, ho Jakob, kaj ne por Mi vi laboris, ho Izrael. 23
Vi ne alportadis al Mi viajn ŝafidojn de brulofero kaj
ne honoradis Min per viaj buĉoferoj; Mi ne servigis
vin per farunoferoj kaj ne lacigis vin per olibano.
24 Vi ne aĉetis por Mi per mono bonodoran kanon
kaj ne satigis Min per la sebo de viaj buĉoferoj; vi
nur laborŝarĝis Min per viaj pekoj, lacigis Min per
viaj malbonagoj. 25 Mi, Mi forviŝas viajn krimojn
pro Mi mem, kaj viajn pekojn Mi ne rememoros. 26
Rememorigu al Mi, kaj ni faru juĝon inter ni; rakontu
vi, por ke vi vin pravigu. 27 Via prapatro pekis, kaj
viaj profetoj defalis de Mi. 28 Tial Mi sensanktigis
la estrojn de la sanktejo, kaj Mi elmetis Jakobon al
anatemo kaj Izraelon al malhonoro.

## 44

Sed nun aŭskultu, ho Jakob, Mia servanto, kaj
Izrael, kiun Mi elektis. 2 Tiele diras la Eternulo,
kiun vin kreis kaj formis kaj helpas vin de post via
naskiĝo: Ne timu, ho Jakob, Mia servanto, kaj vi, ho
Jeŝurun, kiun Mi elektis. 3 Ĉar Mi verŝos akvon sur
la soifantaĵon kaj torentojn sur la sekan teron; Mi
verŝos Mian spiriton sur vian idaron kaj Mian benon
sur viajn devenontojn, 4 por ke ili kresku inter herbo,
kiel salikoj super torentoj da akvo. 5 Unu diros: Mi
apartenas al la Eternulo; alia nomos sin per la nomo
de Jakob; alia skribe konsekros sin al la Eternulo
kaj prenos al si la alnomon Izrael. 6 Tiele diras la
Eternulo, la Reĝo de Izrael, kaj lia Liberiganto, la
Eternulo Cebaot: Mi estas la unua, kaj Mi estas la lasta,
kaj ne ekzistas Dio krom Mi. 7 Kaj kiu estas simila
al Mi? li diru kaj anoncu, kaj elmetu antaŭ Mi ĉion,
kio estis de post la tempo, kiam Mi kreis la popolon
eternan; ili anoncu tion, kio estos kaj kio venos. 8
Ne timu kaj ne maltrankviliĝu; Mi aŭdigis ja al vi kaj
antaŭdiris antaŭlonge; kaj vi estas Miaj atestantoj. Ĉu
ekzistas Dio krom Mi? ne ekzistas Roko, Mi iun ne
konas. 9 Ĉiuj, kiuj faras idolojn, estas vantaĵo, kaj iliaj
amataĵoj estas senutilaj, kaj ili mem estas atestantoj;
ili ne vidas kaj ne komprenas, tial ili estos hontigataj.
10 Kiu faris dion, kaj fandis idolon, kiu nenion utilas?
11 Ĉiuj partoprenintoj estos hontigataj, ĉar la majstroj
estas ja el homoj; ili ĉiuj kolektiĝu kaj stariĝu, ili
ektimos, kaj ĉiuj kune estos hontigataj. 12 Unu tranĉas
la feron per ĉizilo, laboras per karboj, formas ĝin
per marteloj, kaj prilaboras ĝin per la forto de sia
brako; li eĉ malsatas kaj perdas la fortojn, ne trinkas
akvon kaj laciĝas. 13 Alia hakas lignon, mezuras ĝin
per ŝnuro, faras konturojn per grifelo, rabotas per
rabotilo, ĉirkaŭsignas per cirkelo, kaj faras el ĝi bildon
de homo, de bela homo, por ke ĝi loĝu en la domo. 14
Li hakas por si cedrojn, prenas ilekson kaj kverkon,
preparas al si provizon de arbaraj arboj, plantas pinon,
kiun la pluvo kreskigas. 15 Kaj tio servas al la homo
kiel hejtilo; li prenas el tio kaj varmigas sin, li ankaŭ
faras fajron kaj bakas panon; el tio sama li faras dion
kaj adorkliniĝas antaŭ ĝi, li faras el ĝi idolon kaj
adoras ĝin. 16 Parton el ĝi li forbruligas en fajro,
super parto li manĝas viandon, rostas rostaĵon, kaj
satiĝas; li ankaŭ varmigas sin, kaj diras: Ha, ha, fariĝis
al mi varme, mi eksentis fajron! 17 Kaj ĝian restaĵon
li faris dio, li faris el ĝi sian idolon; li adoras ĝin,
adorkliniĝas kaj preĝas al ĝi, kaj diras: Savu min, ĉar
vi estas mia dio. 18 Ili ne scias kaj ne komprenas, ĉar
gluitaj estas iliaj okuloj, por ke ili ne vidu, por ke ilia
koro ne komprenu. 19 Kaj li ne primeditas en sia koro,
ne havas scion nek komprenon, por diri: Duonon de
ĝi mi forbruligis en fajro, mi ankaŭ bakis sur ĝiaj
karboj panon, mi rostis viandon kaj manĝis; ĉu do el
la restaĵo mi faros abomenindaĵon? ĉu ŝtipon da ligno
mi adoros? 20 Li postkuras polvon, la trompita koro
lin erarigas, kaj li ne savas sian animon, kaj ne diras:
Ĉu ne malveraĵon mi havas en mia dekstra mano? 21
Memoru tion, ho Jakob, kaj Izrael, ĉar vi estas Mia
servanto; Mi kreis vin Mia servanto; vi, ho Izrael, ne
estos forgesita de Mi. 22 Mi forviŝis viajn kulpojn kiel
nubon, kaj viajn pekojn kiel nebulon; revenu al Mi,
ĉar Mi savis vin. 23 Ĝojkriu, ho ĉielo, ĉar la Eternulo
tion faris; voku, profundo de la tero; sonigu kanton,
ho montoj, arbaro kaj ĉiuj arboj en ĝi; ĉar la Eternulo
liberigis Jakobon, kaj faris Sin glora per Izrael. 24 Tiele
diras la Eternulo, via Liberiginto, kiu formis vin de la
momento de via naskiĝo: Mi estas la Eternulo, kiu
ĉion faras, kiu sola etendis la ĉielon, per Sia propra

potenco disvastigis la teron; 25 kiu neniigas la signojn
de divenistoj kaj ridindigas la sorĉistojn, repuŝas la
saĝulojn malantaŭen kaj malsaĝigas ilian scion; 26 kiu
konfirmas la vorton de Sia servanto kaj plenumas la
decidojn de Siaj senditoj; kiu diras pri Jerusalem: Ĝi
havos multe da loĝantoj; kaj pri la urboj de Judujo: Ili
estos rekonstruitaj, kaj iliajn ruinojn Mi restarigos; 27
kiu diras al la maro: Estu seka, kaj Mi sekigos viajn
riverojn; 28 kiu diras pri Ciro: Li estas Mia paŝtisto, kaj
li plenumos ĉiujn Miajn dezirojn, dirante al Jerusalem:
Estu rekonstruata, kaj la templo estu refondata.

45 Tiele diras la Eternulo pri Sia sanktoleito Ciro:
Mi prenis lin je lia dekstra mano, por faligi antaŭ
li popolojn, kaj la lumbojn de reĝoj Mi senzonigos, por
malfermi antaŭ li la pordojn, kaj por ke la pordegoj ne
estu ŝlositaj. 2 Mi iros antaŭ vi kaj ebenigos altaĵojn;
kuprajn pordojn Mi disbatos, kaj ferajn riglilojn Mi
rompos. 3 Kaj Mi transdonos al vi trezorojn sekretajn
kaj riĉaĵojn kaŝitajn, por ke vi eksciu, ke Mi, la
Eternulo, vokis vin laŭ via nomo, Mi, Dio de Izrael. 4
Pro Mia servanto Jakob kaj pro Mia elektito Izrael Mi
vokis vin laŭ via nomo, Mi altigis vin, kvankam vi Min
ne konis. 5 Mi estas la Eternulo, kaj ne ekzistas alia; ne
ekzistas Dio krom Mi; Mi zonis vin, kvankam vi Min ne
konis; 6 por ke oni eksciu oriente kaj okcidente, ke ne
ekzistas krom Mi; Mi estas la Eternulo, kaj ne ekzistas
alia, 7 kiu faras lumon kaj kreas mallumon, faras
pacon kaj estigas malbonon; Mi, la Eternulo, faras
ĉion ĉi tion. 8 Gutigu, ho ĉielo, de supre, kaj la nuboj
verŝu virton; malfermiĝu la tero kaj produktu savon,
kaj virto kune elkresku. Mi, la Eternulo, tion kreis. 9
Ve al tiu, kiu malpacas kun sia Kreinto! potpeco el la
potpecoj de la tero! Ĉu diras argilo al sia potfaristo:
Kion vi faras? via faritaĵo estas malforta? 10 Ve al tiu,
kiu diras al la patro: Por kio vi naskigas? kaj al la
patrino: Por kio vi turmentas vin per naskado? 11
Tiele diras la Eternulo, la Sanktulo de Izrael kaj lia
Kreinto: Pri la estonteco demandu Min; la zorgon
pri Miaj filoj kaj pri la faritaĵo de Miaj manoj lasu al
Mi. 12 Mi faris la teron kaj kreis la homon sur ĝi; Mi
per Miaj manoj etendis la ĉielon kaj aranĝis ĉiujn
ĝiajn apartenaĵojn. 13 Mi starigis lin por justeco, kaj
ĉiujn liajn vojojn Mi ebenigos; li rekonstruos Mian
urbon kaj forliberigos Miajn ekzilitojn, ne pro elaĉeto
nek pro donacoj, diras la Eternulo Cebaot. 14 Tiele
diras la Eternulo: La laborakiro de Egiptujo kaj la
komercaĵo de Etiopujo kaj de Seba, de tiuj altkreskaj
viroj, transiros al vi kaj estos viaj; ili iros post vi, en
katenoj ili preteriros, kaj ili kliniĝos antaŭ vi, kaj
preĝos al vi: Nur ĉe vi estas Dio, kaj ne ekzistas alia
Dio. 15 Vere Vi estas Dio Sin kaŝanta, Dio de Izrael,
Savanto. 16 Hontigataj kaj malhonorataj ili ĉiuj estas;
kune kun ili iros en honto la farantoj de idoloj. 17 Sed
Izrael estas savita de la Eternulo per savo eterna; vi ne
estos hontigataj nek malhonorataj ĝis eterneco. 18 Ĉar
tiele diras la Eternulo; la kreinto de la ĉielo, Li estas
Dio; la farinto kaj estiginto de la tero, Li ĝin aranĝis; Li
kreis ĝin, ne por ke ĝi estu malplena; Li faris ĝin, por
ke ĝi estu loĝata: Mi estas la Eternulo, kaj ne ekzistas
alia. 19 Ne sekrete Mi parolis, sur malluma loko de
la tero; Mi ne diris al la idaro de Jakob: Vane vi Min
serĉas. Mi estas la Eternulo, kiu parolas justaĵon kaj
anoncas veraĵon. 20 Kolektiĝu kaj venu, alproksimiĝu
kune, ĉiuj savitoj el la nacioj. Senprudentaj estas tiuj,
kiuj portas siajn lignajn idolojn, kaj preĝas al dio,
kiu ne povas helpi. 21 Diru, eĉ interproksimiĝu kaj
interkonsiliĝu: kiu anoncis tion en la antikva tempo,
kaj diris tion antaŭlonge? ĉu ne Mi, la Eternulo?
kaj ne ekzistas alia Dio krom Mi, la Dio vera kaj la
helpanto; ekzistas neniu krom Mi. 22 Turnu vin al Mi,
ĉiuj finoj de la tero, kaj estu savitaj; ĉar Mi estas Dio,
kaj ne ekzistas alia. 23 Mi ĵuris per Mi, el Mia buŝo
eliris vero, vorto ne retirota, ke antaŭ Mi kliniĝos
ĉiu genuo, ĵuros ĉiu lango. 24 Nur la Eternulo, oni
diros pri Mi, havas veron kaj potencon; al Li venos kaj
hontos ĉiuj, kiuj koleris kontraŭ Li. 25 Per la Eternulo
praviĝos kaj gloriĝos la tuta idaro de Izrael.

46 Kliniĝis Bel, falis Nebo; iliaj idoloj estas
transdonitaj al bestoj kaj brutoj; tio, kion vi
portadis, fariĝis ŝarĝo por lacaj bestoj. 2 Ili kliniĝis kaj
falis kune, ne povis savi sian ŝarĝon, kaj mem iris en
malliberecon. 3 Aŭskultu Min, domo de Jakob kaj la
tuta restaĵo de la domo de Izrael, kiuj estas ŝarĝitaj
sur Mi de post via naskiĝo, kiuj estas portataj de Mi de
post via eliro el la ventro. 4 Ankaŭ ĝis via maljuneco
Mi estos la sama, kaj ĝis via griziĝo Mi vin portos; Mi
vin kreis kaj Mi portos, Mi ŝarĝos sur Min kaj Mi savos.
5 Al kiu vi Min egaligos kaj komparos kaj similigos
Min, ke ni estu similaj? 6 Tiuj, kiuj ŝutas oron el la
saketo kaj pesas arĝenton sur pesilo, dungas oraĵiston,
ke li faru el tio dion, antaŭ kiu ili kliniĝas kaj ĵetas sin
teren, 7 levas lin sur la ŝultron, portas kaj starigas

lin sur lia loko; kaj li staras, ne moviĝas de sia loko;
eĉ se oni krias al li, li ne respondas kaj neniun savas
el lia malfeliĉo. 8 Memoru tion kaj estu viroj, prenu
tion al via koro, ho pekantoj. 9 Memoru tion, kio estis
en la komenco de la tempo; ĉar Mi estas Dio, kaj ne
ekzistas alia; Mi estas Dio, kaj ne ekzistas simila al Mi.
10 Mi anoncas antaŭe la estontaĵon, kaj antaŭlonge
tion, kio ankoraŭ ne okazis; kiam Mi diras, Mia decido
plenumiĝas, kaj ĉion, kion Mi deziras, Mi faras. 11 Mi
vokas de oriento aglon, el lando malproksima viron
de Mia destino. Kion Mi diris, tion Mi venigos; kion
Mi pripensis, tion Mi plenumos. 12 Aŭskultu Min, vi,
kiuj havas malhumilan koron, kiuj estas malproksimaj
de la vero: 13 Mi alproksimigis Mian veron, por ke ĝi
ne estu malproksima, kaj Mia savo ne prokrastiĝos;
kaj Mi donos al Cion savon, al Izrael Mian gloron.

47 Iru malsupren kaj sidiĝu sur polvo, ho virgulino
filino de Babel; sidiĝu sur la tero, sentronigita
filino de la Ĥaldeoj; ĉar oni ne plu nomos vin delikata
kaj dorlotata. 2 Prenu manan muelilon kaj muelu
farunon; forigu vian vualon, levu vian vestrandon,
malkovru vian kruron, transiru riverojn. 3 Malkovriĝos
via nudaĵo, kaj montriĝos via honto. Mi faros venĝon,
kaj Mi neniun indulgos. 4 Nia Liberiganto — Lia nomo
estas Eternulo Cebaot, Sanktulo de Izrael. 5 Sidu
silente kaj iru en mallumon, ho filino de la Ĥaldeoj,
ĉar oni ne plu nomos vin estrino de regnoj. 6 Kiam Mi
koleris Mian popolon, malhonoris Mian heredaĵon,
kaj transdonis ilin en viajn manojn, vi ne montris al
ili kompaton, sur maljunulon vi metis tre peze vian
jugon; 7 vi diris: Eterne mi estos estrino; vi ne prenis
tion al via koro, ne pensis pri la sekvoj. 8 Aŭskultu do
nun, ho voluptulino, kiu sidas senzorge, kiu diras en
sia koro: Mi estas, kaj ne ekzistas alia krom mi; mi ne
fariĝos vidvino, kaj mi ne konos perdon de infanoj. 9
Venos do sur vin tiuj du aferoj subite, en unu tago;
seninfaneco kaj vidvineco en plena mezuro trafos vin,
malgraŭ viaj multaj sorĉoj, malgraŭ la granda forto
de viaj magiaĵoj. 10 Vi sentis vin sendanĝera en via
malboneco; vi diris: Neniu min vidas; via saĝeco kaj
via scio estis viaj delogantoj; kaj vi diris en via koro:
Mi estas, kaj ne ekzistas alia krom mi. 11 Tial venos
sur vin malbono, kies komencon vi ne scios, kaj falos
sur vin malfeliĉo, el kiu vi ne povos vin elaĉeti, kaj
surprizos vin pereo, kiun vi ne antaŭvidis. 12 Restu do
ĉe viaj magiaĵoj, kaj ĉe viaj multaj sorĉoj, super kiuj vi
laboris de via juneco; eble vi povos profiti, eble vi
fortiĝos. 13 Vi laciĝis de la multo de viaj konsiliĝoj;
nun ili stariĝu, la mezurantoj de la ĉielo, la esplorantoj
de la steloj, la antaŭdiristoj laŭ la luno, kaj ili savu
vin kontraŭ tio, kio trafos vin. 14 Jen, ili fariĝos kiel
pajlo; la fajro forbruligos ilin; ili ne savos sian animon
el la forto de la flamo; ne estos ia karbo, ĉe kiu sin
varmigi, nek fajro, antaŭ kiu sidi. 15 Tiaj fariĝis por vi
tiuj, kun kiuj vi multe penis, kun kiuj vi interrilatis de
via juneco; ĉiu forvagis siaflanken, neniu vin savos.

48 Aŭskultu tion, ho domo de Jakob, vi, kiuj estas
nomataj per la nomo de Izrael, kiuj devenis el la
fonto de Jehuda, kiuj ĵuras per la nomo de la Eternulo
kaj citas la Dion de Izrael, ne en vero kaj ne en justeco.
2 Laŭ la sankta urbo ili sin nomas, kaj je la Dio de
Izrael ili sin apogas; Eternulo Cebaot estas Lia nomo.
3 La estintajn okazintaĵojn Mi anoncis antaŭlonge, el
Mia buŝo tio eliris, kaj Mi ĝin aŭdigis; Mi agis subite,
kaj ĉio plenumiĝis. 4 Ĉar Mi sciis, ke vi estas obstina
kaj via kolo estas fera tendeno kaj via frunto estas
kupra, 5 tial Mi anoncis al vi antaŭlonge, Mi aŭdigis
al vi, antaŭ ol tio plenumiĝis, por ke vi ne diru: Mia
idolo tion faris, mia statuo kaj mia fanditaĵo tion
ordonis. 6 Vi aŭdis; rigardo do ĉion; ĉu vi ne devas
mem tion konfesi? Mi aŭdigis al vi nun aferojn novajn
kaj kaŝitajn, kiujn vi ne sciis. 7 Nun ili estas kreitaj, ne
antaŭlonge; eĉ unu tagon antaŭe vi ne aŭdis pri tio,
por ke vi ne diru: Jen, mi sciis pri ili. 8 Vi ne aŭdis, vi
ne sciis, kaj via orelo antaŭe ne estis malfermita; ĉar
Mi sciis, ke vi perfidos, de la momento de via naskiĝo
oni ja nomas vin nefidindulo. 9 Pro Mia nomo Mi
prokrastas Mian koleron, kaj pro Mia gloro Mi detenas
Min, ke Mi ne ekstermu vin. 10 Jen Mi vin refandis,
sed ne rezultis arĝento; Mi elprovis vin en la forno
de mizero. 11 Por Mi, por Mi Mi tion faras; ĉar kial
oni blasfemu? Mian gloron Mi ne donos al iu alia. 12
Aŭskultu Min, ho Jakob kaj Mia alvokito Izrael: tio
estas Mi; Mi estas la unua, kaj Mi estas la lasta. 13
Nur Mia mano fondis la teron, kaj Mia dekstra mano
etendis la ĉielon; se Mi vokos ilin, ili stariĝos kune. 14
Kolektiĝu vi ĉiuj kaj aŭskultu: kiu inter ili anoncis
tion? tiu, kiun la Eternulo ekamis, plenumos Lian
volon en Babel kaj aperigos Lian potencon super la
Ĥaldeoj. 15 Mi, Mi tion diris, Mi lin alvokis, venigis, kaj
sukcesigis lian vojon. 16 Alproksimiĝu al Mi, aŭskultu
tion; de la komenco Mi ne parolis sekrete; de la

momento, kiam la afero komenciĝis, Mi tie estis. Kaj
ankaŭ nun sendis min la Sinjoro, la Eternulo, kaj Lia
spirito. 17 Tiele diras la Eternulo, via Liberiganto, la
Sanktulo de Izrael: Mi estas la Eternulo, via Dio, kiu
instruas vin por via utilo, kiu kondukas vin laŭ la vojo,
kiun vi devas iri. 18 Ho, se vi atentus Miajn ordonojn!
tiam via paco estus kiel rivero, kaj via justeco kiel la
ondoj de la maro; 19 kaj via idaro estus kiel sablo,
kaj viaj devenantoj kiel ĝiaj grajnetoj; lia nomo ne
estus ekstermita nek pereigita antaŭ Mi. 20 Eliru el
Babel, kuru el Ĥaldeujo, anoncu kun voĉo ĝojkria,
aŭdigu tion, disportu ĝin ĝis la fino de la tero, diru:
La Eternulo liberigis Sian servanton Jakob. 21 Kaj ili
ne soifis en la dezertoj, tra kiuj Li kondukis ilin; Li
elfluigis por ili akvon el roko, Li disfendis rokon, kaj
ekfluis akvo. 22 Sed por la malpiuloj, diras la Eternulo,
ne ekzistas paco.

49 Aŭskultu min, ho insuloj, kaj atentu, ho
malproksimaj gentoj: la Eternulo min alvokis
el la ventro, el la interno de mia patrino Li vokis
mian nomon. 2 Kaj Li faris mian buŝon simila al akra
glavo, kovris min per la ombro de Sia mano, kaj faris
min polurita sago, kaŝis min en Sia sagujo. 3 Kaj
Li diris al mi: Vi estas Mia servanto, ho Izrael, per
kiu Mi gloriĝos. 4 Mi opiniis, ke vane mi penis, ke
sencele kaj vane mi konsumis mian forton; sed vere
mia rajto estas ĉe la Eternulo, kaj mia rekompenco ĉe
mia Dio. 5 Kaj nun diris la Eternulo, kiu el la patrina
ventro kreis min Lia servanto, por ke mi revenigu
al Li Jakobon kaj por ke Izrael kolektiĝu ĉe Li (ĉar
mi estas honorata antaŭ la okuloj de la Eternulo,
kaj mia Dio estas mia forto) — 6 Li diris: Ne sufiĉas,
ke vi estas Mia servanto, por restarigi la tribojn de
Jakob kaj revenigi la konservitojn de Izrael; sed Mi
faros vin lumo por la nacioj, por ke Mia savo etendiĝu
ĝis la fino de la tero. 7 Tiele diras la Eternulo, la
Liberiganto de Izrael, lia Sanktulo, al la malestimata
animo, al la abomenato de la popoloj, al la sklavo de
la regantoj: Reĝoj ekvidos kaj leviĝos; princoj, kaj ili
adorkliniĝos; pro la Eternulo, kiu estas fidinda, pro
la Sanktulo de Izrael, kiu vin elektis. 8 Tiele diras la
Eternulo: En la tempo de favoro Mi aŭskultos vin, kaj
en la tago de savo Mi helpos vin, kaj Mi konservos vin
kaj faros vin interligo por la popoloj, por restarigi
la teron, por ekposedi dezertigitajn posedaĵojn, 9
por diri al la malliberigitoj: Eliru! al la troviĝantoj en
mallumo: Montriĝu! Ĉe la vojoj ili paŝtiĝos, kaj sur ĉiuj
nudaj montetoj estos ilia paŝtejo. 10 Ili ne malsatos
nek soifos, ne frapos ilin siroko nek la suno; ĉar ilia
Kompatanto ilin kondukos, kaj al fontoj de akvo Li ilin
gvidos. 11 Kaj Mi faros ĉiujn Miajn montojn vojo, kaj
Miaj vojetoj estos ebene altigitaj. 12 Jen tiuj venos de
malproksime, kaj aliaj de nordo kaj de okcidento, kaj
aliaj el la lando Sinim. 13 Ĝojkriu, ho ĉielo, kaj ĝoju,
ho tero, sonigu kanton, ho montoj; ĉar la Eternulo
konsolis Sian popolon kaj kompatis Siajn mizerulojn.
14 Sed Cion diris: La Eternulo min forlasis, kaj mia
Sinjoro min forgesis. 15 Ĉu povas virino forgesi sian
infaneton kaj ne kompati la idon de sia ventro? eĉ se
ili forgesos, Mi vin ne forgesos. 16 Jen sur Miaj manoj
Mi vin gravuris; viaj muroj estas ĉiam antaŭ Mi. 17
Rapidos viaj konstruantoj; viaj detruantoj kaj viaj
ekstermantoj eliros for de vi. 18 Levu ĉirkaŭen viajn
okulojn, kaj rigardu: ĉiuj kolektiĝis, venas al vi. Kiel
Mi vivas, diras la Eternulo, vi ĉiujn metos sur vin kiel
ornamon, kaj vi ĉirkaŭligos vin per ili kiel fianĉino.
19 Ĉar viaj dezertigitaj kaj senhomigitaj lokoj kaj via
ruinigita lando estas tro malvastaj por la loĝantoj,
kaj viaj ekstermantoj estos malproksimigitaj. 20 Viaj
malaperintaj infanoj ankoraŭ diros en viajn orelojn:
Tro malvasta estas por mi la loko; cedu al mi, ke mi
povu loĝi. 21 Tiam vi diros en via koro: Kiu naskis al
mi ĉi tiujn? mi estis ja seninfana kaj soleca, elpelita
kaj forpuŝita; kiu do edukis ilin? mi restis ja sola; kie
do estis ĉi tiuj? 22 Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo:
Jen Mi levos Mian manon al la nacioj, kaj antaŭ la
gentoj Mi elmetos Mian standardon; kaj ili venigos
viajn filojn en la baskoj, kaj viajn filinojn ili portos
sur la ŝultroj. 23 Kaj reĝoj estos viaj vartistoj, kaj iliaj
princinoj estos viaj nutristinoj; vizaĝaltere ili kliniĝos
antaŭ vi, kaj la polvon de viaj piedoj ili lekos; kaj tiam
vi ekscios, ke Mi estas la Eternulo, ke Miaj fidantoj
ne hontos. 24 Ĉu de fortulo oni povas forpreni la
akiritaĵon? aŭ ĉu oni povas liberigi la kaptitojn de
venkinto? 25 Sed tiele diras la Eternulo: Eĉ la kaptitoj
estos forprenitaj for de la fortulo, kaj la akiritaĵo de la
potenculo formalaperos; kaj kontraŭ viaj kverelantoj
Mi kverelos, kaj viajn filojn Mi savos. 26 Kaj al viaj
premantoj Mi manĝigos ilian propran karnon, kaj kiel
de mosto ili ebriiĝos de sia propra sango; kaj ekscios
ĉiu karno, ke Mi, la Eternulo, estas via Savanto kaj via
Liberiganto, la Potenculo de Jakob.

**50** Tiele diras la Eternulo: Kie estas la eksedziga
letero de via patrino, per kiu Mi ŝin forpuŝis?
aŭ al kiu el Miaj kreditoroj Mi vendis vin? Jen pro
viaj pekoj vi estas venditaj, kaj pro viaj krimoj estas
forpuŝita via patrino. **2** Kial neniu estis, kiam Mi venis?
kial neniu respondis, kiam Mi vokis? Ĉu Mia mano
fariĝis tro mallonga, por liberigi? kaj ĉu ne ekzistas en
Mi forto, por savi? Jen per Mia severa vorto Mi sekigas
maron, Mi faras el riveroj dezerton; iliaj fiŝoj putras
pro senakveco kaj mortas de soifo. **3** Mi vestas la
ĉielon per mallumo, kaj sakaĵon Mi faras ĝia kovrilo. **4**
La Sinjoro, la Eternulo, donis al mi langon instruitan,
por ke mi povosciu vigligi per vorto senfortigiton;
Li vekas, ĉiumatene vekas mian orelon, por ke mi
aŭskultu kiel instruatoj. **5** La Sinjoro, la Eternulo,
malfermis mian orelon, kaj mi ne kontraŭstaris, mi ne
turnis min malantaŭen. **6** Mian dorson mi elmetis al
la batantoj kaj miajn vangojn al la harŝirantoj; mian
vizaĝon mi ne kovris kontraŭ insultoj kaj kraĉado.
**7** Sed la Sinjoro, la Eternulo, helpas al mi, tial mi
ne estas hontigata; tial mi faris mian vizaĝon kiel
siliko, kaj mi scias, ke mi ne estos senhonorigata. **8**
Proksima estas mia praviganto; kiu procesos kontraŭ
mi? ni stariĝu kune; kiu postulas juĝon kontraŭ mi,
li alproksimiĝu al mi. **9** Jen la Sinjoro, la Eternulo,
helpas al mi; kiu do malpravigos min? jen ili ĉiuj
elfrotiĝos kiel vesto, tineoj ilin tramanĝos. **10** Kiu
inter vi timas la Eternulon, aŭskultas la voĉon de
Lia servanto? Kvankam li iras en mallumo kaj nenio
brilas al li, tamen li fidu la nomon de la Eternulo kaj
apogu sin sur sia Dio. **11** Jen vi ĉiuj, kiuj ekbruligas
fajron, ĉirkaŭas sin per flamoj, iru en la lumon de via
fajro, kaj en la flamojn, kiujn vi ekbruligis. Per Mia
mano tio fariĝos al vi; en doloro vi kuŝos.

**51** Aŭskultu Min, vi, kiuj postkuras la veron, kiuj
serĉas la Eternulon: rigardu la rokon, el kiu vi
estas elhakitaj, kaj en la profundon de la kavo, el kiu
vi estas elfositaj. **2** Rigardu Abrahamon, vian patron,
kaj Saran, vian naskintinon; ĉar Mi alvokis lin, kiam
li estis sola, kaj Mi benis lin kaj multigis lin. **3** Ĉar
la Eternulo konsolos Cionon, konsolos ĉiujn ĝiajn
ruinojn, kaj ĝian dezerton Li faros kiel Eden, kaj ĝian
stepon kiel la ĝardeno de la Eternulo; ĝojo kaj gajeco
troviĝos en ĝi, dankado kaj laŭta kantado. **4** Atentu
Min, ho Mia popolo, kaj vi, Mia gento, aŭskultu Min;
ĉar instruo eliros el Mi, kaj Mian leĝon Mi starigos
kiel lumon por la popoloj. **5** Proksima estas Mia vero,
eliris Mia helpo, kaj Miaj brakoj juĝos popolojn; al Mi
esperas insuloj kaj atendas Mian brakon. **6** Levu al la
ĉielo viajn okulojn, kaj rigardu la teron malsupre; ĉar
la ĉielo disneniiĝos kiel fumo, kaj la tero elfrotiĝos
kiel vesto, kaj ĝiaj loĝantoj mortos kiel kuloj; sed
Mia savo restos eterne, kaj Mia vero ne difektiĝos. **7**
Aŭskultu Min, vi, kiuj konas la veron, popolo, havanta
Mian instruon en sia koro: ne timu ofendon de homoj,
kaj de iliaj insultoj ne senkuraĝiĝu. **8** Ĉar kiel veston
tramanĝos ilin tineoj, kaj kiel lanaĵon tramanĝos ilin
vermoj; sed Mia vero restos eterne, kaj Mia savo por
ĉiuj generacioj. **9** Leviĝu, leviĝu, vestu vin per forto,
ho brako de la Eternulo; leviĝu, kiel en la tempo
antikva, en la generacioj de antaŭlonge. Ĉu ne vi
dishakis Rahabon, trapikis la drakon? **10** Ĉu ne vi
elsekigis la maron, la akvon de grandega abismo,
faris la maran profundon vojo por transiro de la
liberigitoj? **11** Kaj la elaĉetitoj de la Eternulo revenos
kaj iros sur Cionon kun kantado, kaj ĝojo eterna
estos super ilia kapo; ĝojon kaj gajecon ili atingos,
kaj forflugos afliktoj kaj ĝemado. **12** Mi, Mi mem
estas via konsolanto. Kiu vi estas, ke vi timas homon
morteman, kaj homidon, kiu estas egala al herbo; **13**
kaj vi forgesis la Eternulon, vian Kreinton, kiu etendis
la ĉielon kaj fondis la teron; kaj konstante, ĉiutage, vi
timas la furiozon de la premanto, kiu celas ekstermi?
Sed kie estas la furiozo de la premanto? **14** Baldaŭ
la kaptito estos liberigita, ke li ne mortu en la kavo
kaj ne manku al li pano. **15** Mi estas la Eternulo, via
Dio, kiu kvietigas la maron, kiam bruas ĝiaj ondoj, kaj
kies nomo estas Eternulo Cebaot. **16** Mi metis Miajn
vortojn en vian buŝon kaj kovris vin per la ombro de
Mia mano, por aranĝi la ĉielon kaj doni fundamenton
al la tero, kaj por diri al Cion: Vi estas Mia popolo. **17**
Vekiĝu, vekiĝu, leviĝu, ho Jerusalem, vi, kiu trinkis
el la mano de la Eternulo la kalikon de Lia kolero;
la ŝaŭmantan ebriigantan kalikon vi eltrinkis ĝis la
fundo. **18** El ĉiuj filoj, kiujn ŝi naskis, neniu ŝin gvidis;
el ĉiuj filoj, kiujn ŝi edukis, neniu tenis ŝin je la mano.
**19** Tio ambaŭ vin trafis; kiu kompatis vin? ruinado kaj
malfeliĉo, malsato kaj glavo; per kiu mi povus konsoli
vin? **20** Viaj filoj senfortiĝis, kuŝis ĉe la komenco de
ĉiuj stratoj kiel cervo en reto, plenaj de la kolero de la
Eternulo, de la indigno de via Dio. **21** Tial aŭskultu
ĉi tion, vi, mizerulino kaj ebriulino, sed ne de vino:
**22** tiele diras via Sinjoro, la Eternulo, kaj via Dio, kiu

defendas Sian popolon: Jen Mi prenis el via mano la
ebriigan kalikon, la ŝaŭmantan kalikon de Mia kolero;
vi ne plu trinkos ĝin; 23 kaj Mi transdonos ĝin en la
manon de viaj turmentantoj, kiuj diris al via animo:
Klinu vin, por ke ni transiru; kaj vi faris el via dorso
kvazaŭ teron, kvazaŭ straton por pasantoj.

**52** Vekiĝu, vekiĝu, vestu vin per via forto, ho Cion;
surmetu sur vin la vestojn de via majesto, ho
Jerusalem, sankta urbo; ĉar ne plu eniros en vin
necirkumcidito kaj malpurulo. 2 Forskuu de vi la
polvon, leviĝu, sidiĝu, ho Jerusalem; disigu la ligilojn
de via kolo, ho kaptita filino de Cion. 3 Ĉar tiele
diras la Eternulo: Senpage vi estis vendita, kaj ne per
arĝento vi estos elaĉetita. 4 Ĉar tiele diras la Sinjoro,
la Eternulo: En Egiptujon iam iris Mia popolo, por loĝi
tie kelktempe, kaj la Asiriano pro nenio ĝin premis; 5
kion do Mi nun ĉi tie devas fari, diras la Eternulo, kiam
Mia popolo estas prenita pro nenio? ĝiaj regantoj
triumfe krias, diras la Eternulo, kaj konstante, ĉiutage,
Mia nomo estas insultata. 6 Tial Mia popolo ekkonos
Mian nomon; tial ĝi ekscios en tiu tago, ke Mi estas Tiu
sama, kiu diras: Jen Mi estas. 7 Kiel ĉarmaj estas sur la
montoj la piedoj de anoncanto, kiu proklamas pacon,
anoncas bonon, sciigas pri helpo, diras al Cion: Reĝas
via Dio! 8 Jen eksonis la voĉo de viaj gardostarantoj;
ili levas la voĉon kaj kune ĝojkrias, ĉar per siaj propraj
okuloj ili vidas, kiel la Eternulo revenas al Cion. 9
Triumfu, ĝojkriu kune, ho ruinoj de Jerusalem; ĉar la
Eternulo konsolis Sian popolon, liberigis Jerusalemon.
10 La Eternulo malkovris Sian sanktan brakon antaŭ la
okuloj de ĉiuj nacioj; kaj ĉiuj finoj de la tero vidas
la helpon de nia Dio. 11 Foriru, foriru, eliru el tie,
ne tuŝu malpuraĵon; eliru el ĝia mezo; purigu vin,
ho portantoj de la vazoj de la Eternulo. 12 Tamen
ne rapidante vi eliros, kaj ne forkurante vi iros; ĉar
iros antaŭ vi la Eternulo, kaj gardos vin malantaŭe la
Dio de Izrael. 13 Jen Mia servanto havos sukceson, li
altiĝos kaj gloriĝos kaj staros tre alte. 14 Kiel multaj
estis teruritaj, rigardante vin (tiele lia aspekto estis
malbeligita pli ol ĉe ĉiu alia kaj lia eksteraĵo pli ol ĉe
iu ajn homo), 15 tiel li saltigos pri si multe da popoloj;
reĝoj fermos antaŭ li sian buŝon, ĉar ili vidos ion, kio
ne estis dirita al ili, kaj ili rimarkos ion, pri kio ili ne
aŭdis.

**53** Kiu kredus al tio, kion ni aŭdis? kaj super kiu
malkaŝiĝis la brako de la Eternulo? 2 Ĉar li
elkreskis antaŭ Li kiel juna branĉo kaj kiel radiko el
tero senakva; li ne havis staturon nek belecon; ni
rigardis lin, sed li ne havis aspekton, per kiu li plaĉus
al ni. 3 Li estis malestimata kaj evitata de homoj,
viro suferanta kaj malsana; kaj kiel iganta deturni
de li la vizaĝon, li estis malestimata, kaj li havis por
ni nenian valoron. 4 Vere, niajn malsanojn li portis
sur si, kaj per niaj suferoj li sin ŝarĝis; sed ni opiniis
lin plagita, frapita de Dio, kaj humiligita. 5 Tamen
li estis vundita pro niaj pekoj, dispremita pro niaj
krimoj; puno por nia bono estis sur li, kaj per lia
vundo ni saniĝis. 6 Ni ĉiuj erarvagis kiel ŝafoj, ĉiu
iris sian vojon; kaj la Eternulo ĵetis sur lin la kulpon
de ni ĉiuj. 7 Li estis turmentata, tamen li humiliĝis
kaj ne malfermis sian buŝon; kiel ŝafido kondukata
al buĉo kaj kiel ŝafo muta antaŭ siaj tondantoj, li ne
malfermis sian buŝon. 8 De malliberigo kaj de juĝo li
estas prenita; kaj pri lia generacio kiu rakontos? De
sur la tero de vivantoj li estas fortranĉita, pro la kulpo
de mia popolo li estas frapita. 9 Inter malbonaguloj
oni donis al li tombon, inter riĉuloj post lia morto,
kvankam li ne faris maljustaĵon kaj trompo ne estis
en lia buŝo. 10 Sed la Eternulo volis tiel lin turmenti.
Kiam lia animo estos preninta sur sin elaĉetan punon,
li vidos idaron, li longe vivos, kaj la intenco de la
Eternulo sukcesos per lia mano. 11 La laborfrukton de
sia animo li vidos, kaj satiĝos. Per konigo de li Mia
virtulo-servanto virtigos multajn; kaj iliajn pekojn li
portos sur si. 12 Tial Mi donos al li multajn kiel lian
parton, kaj la potenculojn li dividos kiel akiron; pro
tio, ke li elmetis sian animon al la morto kaj estis
alkalkulita al krimuloj, dum li portis sur si la pekon
de multaj kaj petis por la krimuloj.

**54** Ĝoju, ho senfruktulino, kiu ne naskis; sonigu
kanton kaj ĝojkriu, ho vi, kiu ne suferis doloron;
ĉar la forlasitino havos pli da infanoj, ol la havanta
edzon, diras la Eternulo. 2 Vastigu la spacon de
via tendo, disetendu la tapiŝojn de viaj loĝejoj, ne
retenu; etendu pli longe viajn ŝnurojn, kaj viajn
palisojn fortikigu. 3 Ĉar dekstren kaj maldekstren
vi disvastiĝos, kaj via idaro ekposedos naciojn kaj
ekloĝos en urboj dezertigitaj. 4 Ne timu, ĉar vi ne
estos malhonorata; ne kaŝu vin honte, ĉar vi ne
estos hontigata, kaj ĉar la honton de via juneco vi
forgesos kaj la malhonoron de via vidvineco vi ne plu
rememoros. 5 Ĉar via Kreinto estas via edzo, Eternulo

Cebaot estas Lia nomo; kaj via Liberiginto estas la
Sanktulo de Izrael, kiun oni nomas Dio de la tuta
tero. 6 Ĉar kiel virinon forlasitan kaj afliktitan en la
spirito la Eternulo vin alvokis; kaj kiel edzinon de
la juneco, kvankam forpuŝitan, diras via Dio. 7 Por
malgranda momento Mi vin forlasis, kaj kun granda
kompato Mi vin reprenos al Mi. 8 En eksplodo de
kolero Mi forturnis de vi Mian vizaĝon por momento,
sed per eterna favorkoreco Mi vin kompatis, diras
via Liberiginto, la Eternulo. 9 Ĉar tio estas por Mi
kiel la akvo de Noa; kiel Mi ĵuris, ke Mi ne plu
venigos la akvon de Noa sur la teron, tiel Mi ĵuris,
ke Mi ne koleros vin nek insultos vin. 10 Ĉar montoj
forŝoviĝos kaj altaĵoj ŝanceliĝos; sed Mia favorkoreco
ne foriĝos de vi, kaj la interligo de Mia paco ne
ŝanceliĝos, diras la Eternulo, via Kompatanto. 11 Ho
mizera, suferanta de ventego, senkonsola! jen Mi
donos brilon al viaj ŝtonoj, kaj vian fundamenton Mi
faros el safiroj. 12 Kaj Mi faros viajn murdentojn el
rubenoj kaj viajn pordegojn el kristaloj kaj ĉiujn viajn
limojn el multekostaj ŝtonoj. 13 Kaj ĉiuj viaj infanoj
estos instruitaj de la Eternulo, kaj granda estos la
bonstato de viaj filoj. 14 Per vero vi fortikiĝos; estu
malproksima de premiteco, ĉar vi ne bezonas timi, kaj
de teruro, ĉar ĝi ne alproksimiĝos al vi. 15 Certe, oni
sin armos kontraŭ vi, sed tio ne estos de Mi; kiu sin
armos kontraŭ vi, tiu falos antaŭ vi. 16 Jen Mi kreis la
forĝiston, kiu blovas fajron sur karboj kaj ellaboras
ilojn por siaj faroj; kaj Mi ankaŭ kreis ekstermanton
por detruado. 17 Nenia ilo, kreita kontraŭ vi, havos
sukceson; kaj ĉiun langon, kiu batalos kontraŭ vi en
la juĝo, vi malpravigos. Tio estas la heredaĵo de la
servantoj de la Eternulo, kaj ilia praveco antaŭ Mi,
diras la Eternulo.

**55** Ho vi, ĉiuj soifantoj, iru al la akvo, kaj vi, kiuj
ne havas monon; iru, aĉetu, kaj manĝu; iru,
aĉetu sen mono kaj sen pago vinon kaj lakton. 2
Kial vi donas monon por tio, kio ne estas pano? kaj
vian laboron por tio, kio ne satigas? aŭskultu do
Min, kaj manĝu bonaĵon, kaj via animo ĝuu grasaĵon.
3 Klinu vian orelon, kaj venu al Mi; aŭskultu, por
ke vivu via animo; kaj Mi faros kun vi interligon
eternan pri la fidindaj korfavoroj, promesitaj al David.
4 Jen Mi starigis lin kiel atestanton por la nacioj,
kiel princon kaj ordonanton por la gentoj. 5 Jen vi
vokos popolon, kiun vi ne konas; kaj popolo, kiu vin
ne konas, alkuros al vi, pro la Eternulo, via Dio, kaj
pro la Sanktulo de Izrael, ĉar Li faris vin glora. 6
Serĉu la Eternulon, dum Li estas trovebla; voku Lin,
dum Li estas proksime. 7 Malpiulo forlasu sian vojon,
kaj krimulo siajn intencojn, kaj li returnu sin al la
Eternulo, kaj ĉi Tiu lin kompatos, kaj al nia Dio, ĉar
Li multe pardonas. 8 Ĉar Miaj pensoj ne estas viaj
pensoj, kaj viaj vojoj ne estas Miaj vojoj, diras la
Eternulo. 9 Kiom la ĉielo estas pli alte ol la tero,
tiom Miaj vojoj estas pli alte ol viaj vojoj, kaj Miaj
pensoj ol viaj pensoj. 10 Ĉar kiel la pluvo kaj la neĝo
falas de la ĉielo kaj ne revenas tien, sed malsoifigas
la teron kaj naskigas kaj produktigas ĝin kaj donas
semon al la semanto kaj panon al la manĝanto: 11
tiel estos Mia vorto, kiu eliras el Mia buŝo; ĝi ne
revenos al Mi vane, sed plenumos Mian volon, kaj
sukcesos en tio, por kio Mi ĝin sendis. 12 Kun ĝojo vi
eliros, kaj kun paco vi estos kondukataj; la montoj kaj
montetoj sonigos antaŭ vi kanton, kaj ĉiuj arboj de la
kampo plaŭdos per la manoj. 13 Anstataŭ pikarbetaĵo
elkreskos cipreso, anstataŭ urtiko elkreskos mirto; kaj
tio estos gloro por la Eternulo, eterna signo, kiu ne
ekstermiĝos.

**56** Tiele diras la Eternulo: Gardu justecon kaj faru
bonon; ĉar baldaŭ venos Mia savo kaj malkaŝiĝos
Mia vero. 2 Feliĉa estas la homo, kiu tion faras, kaj la
homido, kiu sin tenas je tio, kaj observas sabaton,
por ne malsanktigi ĝin, kaj gardas sian manon, por
fari nenian malbonon. 3 La fremdulo, kiu aliĝis al
la Eternulo, ne diru: La Eternulo elapartigos min
de Sia popolo; kaj la eŭnuko ne diru: Jen mi estas
arbo velkinta. 4 Ĉar tiele diras la Eternulo pri la
eŭnukoj, kiuj observas Miajn sabatojn, elektas tion,
kio plaĉas al Mi, kaj tenas sin je Mia interligo: 5 Al ili
Mi donos en Mia domo kaj inter Miaj muroj lokon
kaj nomon pli bonan ol al filoj kaj filinoj; Mi donos
al ili nomon eternan, kiu ne ekstermiĝos. 6 Kaj la
fremdulojn, kiuj aliĝis al la Eternulo, por servi al Li
kaj ami la nomon de la Eternulo, por estis Liaj sklavoj,
ĉiujn, kiuj observas sabaton, por ne malsanktigi ĝin,
kaj kiuj tenas sin je Mia interligo, 7 Mi venigos sur
Mian sanktan monton kaj ĝojigos en Mia preĝejo; iliaj
bruloferoj kaj buĉoferoj estos favore akceptataj sur
Mia altaro; ĉar Mia domo estos nomata preĝejo por
ĉiuj popoloj. 8 La Sinjoro, la Eternulo, kiu kolektas
la dispelitojn de Izrael, diras: Al liaj kolektitoj Mi

kolektos ankoraŭ pli. 9 Venu por manĝi, ho ĉiuj bestoj
kampaj, ĉiuj bestoj arbaraj. 10 Liaj gardistoj ĉiuj estas
blindaj, senkomprenaj; ili ĉiuj estas hundoj mutaj, kiuj
ne povas boji, dormemaj, kuŝemaj, amantaj dormeti.
11 Tamen ili estas hundoj avidaj, kiuj ne povas satiĝi;
kaj ili estas paŝtistoj, kiuj nenion komprenas; ĉiu iras
sian vojon, ĉiu siaflanke serĉas sian profiton, dirante:
12 Venu, mi prenos vinon, kaj ni trinku ebriigaĵon;
kaj kiel estas hodiaŭ, tiel estos morgaŭ, multe kaj
ankoraŭ multe pli.

57 La virtulo pereis, kaj neniu prenis tion al sia
koro; kaj piaj homoj estas forkaptataj, kaj neniu
komprenas, ke for de malbono estas forkaptita la
virtulo. 2 Kiu iras ĝustan vojon, tiu venas al paco,
ripozas sur sia kuŝejo. 3 Sed venu ĉi tien vi, ho filoj de
sorĉistino, idoj de adultulo kaj malĉastulino! 4 Kiun vi
mokegas? kontraŭ kiu vi malfermegas la buŝon kaj
elŝovas la langon? ĉu vi ne estas infanoj de krimo,
idoj de mensogo, 5 kiuj varmiĝas en la arbaretoj,
sub ĉiu verdbranĉa arbo; kiuj buĉas la infanojn en
la valoj, sub la elstarantaj rokoj? 6 Inter la glataĵoj
de la valo estas via parto; ili, ili estas via loto; al ili
vi verŝis verŝoferojn, alportis farunoferojn; ĉu Mi
povas esti kontenta pri tio? 7 Sur monto alta kaj
levita vi starigis vian kuŝejon, vi tien supreniris, por
buĉi oferojn. 8 Kaj malantaŭ la pordo kaj la fostoj vi
starigis vian simbolon; ĉar vi forturnis vin de Mi kaj
supreniris, larĝigis vian kuŝejon, kaj ligis vin kun ili;
vi ekamis ilian kuŝejon, elrigardis por vi oportunan
lokon. 9 Oleita vi pilgrimis al la reĝo, uzis multe da
aromaĵoj, kaj vi sendis malproksimen viajn senditojn,
kaj malaltiĝis ĝis Ŝeol. (Sheol h7585) 10 Pro la multeco de
viaj vojoj vi laciĝis, tamen vi ne diris: Mi perdis la
esperon; vi trovis ankoraŭ vivon en via mano, kaj pro
tio vi ne laciĝis. 11 Sed kiu kaŭzis al vi zorgojn, kaj
kiun vi timis, ke vi ekmensogis kaj Min ne memoris
kaj ne prenis al via koro? ĉu pro tio, ke Mi silentas
tre longe, vi Min ne timas? 12 Se Mi montros vian
pravecon kaj viajn farojn, ili ne helpos vin. 13 Kiam vi
krios, viaj idolamasoj vin savu; sed ilin ĉiujn disportos
la vento, forpelos la blovo; kaj kiu fidas Min, tiu
ekposedos la teron kaj heredos Mian sanktan monton.
14 Kaj Li diras: Faru vojon, faru vojon, ebenigu irejon,
forigu malhelpojn de la vojo de Mia popolo. 15 Ĉar
tiele diras la Plejalta kaj Plejsupra, kiu restas eterne
kaj kies nomo estas Sanktulo: Alte kaj en sankta loko
Mi loĝas, sed ankaŭ apud afliktito kaj humilulo, por
revigligi la spiriton de humiluloj kaj revivigi la koron
de afliktitoj. 16 Ĉar ne eterne Mi malpacas kaj ne
senfine Mi koleras; alie tute senfortiĝus antaŭ Mi la
spirito kaj la animoj, kiujn Mi kreis. 17 Pro la peko
de lia avideco Mi koleris kaj frapis lin, Mi deturnis
Min kaj koleris; sed li iris perfide, iris laŭ la vojo de
sia koro. 18 Mi vidis liajn vojojn, kaj Mi lin sanigos;
Mi kondukos lin kaj redonos konsolon al li kaj al liaj
plorantoj. 19 Mi kreos diron de la buŝo: Paco, paco al
malproksimaj kaj al proksimaj, diras la Eternulo; kaj
Mi sanigos lin. 20 Sed la malpiuloj estas kiel malkvieta
maro, kiu ne povas trankviliĝi kaj kies akvo elĵetas
ŝlimon kaj koton. 21 Ne ekzistas paco por la malpiuloj,
diras mia Dio.

58 Kriu per la tuta gorĝo, ne detenu vin, laŭtigu
vian voĉon simile al fanfaro, kaj eldiru al Mia
popolo ĝian krimon kaj al la domo de Jakob ĝiajn
pekojn. 2 Min ili ĉiutage serĉas, kaj ili deziras ekkoni
Miajn vojojn; kiel popolo, kiu faras bonon kaj ne
forlasis la leĝon de sia Dio, ili postulas de Mi justan
juĝon, deziras proksimecon de Dio: 3 Kial ni fastas,
kaj Vi ne vidas? turmentas nian animon, kaj Vi ne
scias? Sed jen en la tago de via fastado vi plenumas
viajn dezirojn, kaj ĉiujn viajn laborantojn vi premas
per postuloj. 4 Jen vi fastas por kverelo kaj malpaco,
kaj por bati per malpia pugno; kiel nun, vi ne fastas
tiel, ke en la alteco estu aŭdata via voĉo. 5 Ĉu tia
estas fasto, kiu plaĉas al Mi, kiam homo turmentas
sian animon, klinas sian kapon kiel kanon, kaj sternas
sub si sakaĵon kaj cindron? ĉu tion vi nomas fasto
kaj tago plaĉanta al la Eternulo? 6 Ja nur tio estas
fasto, kiu plaĉas al Mi, se vi disŝiros la ligilojn de
malpieco, disbatos la katenojn de sklaveco, liberigos
la prematojn, disbatos ĉian jugon; 7 se vi derompos
vian panon por malsatulo kaj senhejmajn malriĉulojn
enkondukos en vian domon; se, vidante nudulon,
vi lin vestos, kaj antaŭ viaj samkarnuloj vi vin ne
kaŝos. 8 Tiam via lumo ekbrilos kiel matenruĝo, kaj
via saniĝo rapide progresos; via virto iros antaŭ vi; la
gloro de la Eternulo gardos vin malantaŭe. 9 Tiam
vi vokos, kaj la Eternulo respondos; vi krios, kaj Li
diros: Jen Mi estas! Se vi forigos el inter vi premadon,
montradon per fingro, kaj paroladon malbonan, 10
kaj malfermos antaŭ malsatulo vian koron, kaj satigos
suferantan animon, tiam via lumo brilos en mallumo

kaj via krepusko estos kiel tagmezo; 11 kaj la Eternulo
kondukos vin ĉiam kaj satigos vian animon en tempo
de senpluveco, kaj Li fortikigos viajn ostojn; kaj vi
estas kiel ĝardeno akvumata, kaj kiel akva fonto,
kies akvo ne mankas. 12 Kaj oni rekonstruos ĉe vi la
antikvajn ruinojn; la fundamentojn de antaŭ multaj
generacioj vi restarigos; kaj oni nomos vin riparanto
de breĉoj, reboniganto de vojoj por loĝado. 13 Se vi
retenos vian piedon en sabato, por ke vi ne plenumu
viajn dezirojn en Mia sankta tago; kaj vi nomos
sabaton plezuro, la sanktigitan tagon de la Eternulo vi
nomos honorata; kaj vi honoros ĝin per nefarado de
viaj ordinaraj aferoj, per neplenumado de viaj deziroj,
kaj per neparolado de vantaĵoj: 14 tiam vi ĝuos per la
Eternulo, kaj Mi sidigos vin sur la altaĵoj de la tero,
kaj Mi nutros vin per la heredaĵo de via patro Jakob;
ĉar tion diras la buŝo de la Eternulo.

**59** Vidu, ne mallongiĝis la mano de la Eternulo,
por ke ĝi ne povu helpi; kaj ne malakriĝis Lia
orelo, por ke Li ne aŭdu. 2 Nur viaj krimoj estis
disigilo inter vi kaj via Dio, kaj viaj pekoj kovris
antaŭ vi Lian vizaĝon, por ke Li ne aŭdu. 3 Ĉar viaj
manoj estas makulitaj per sango, kaj viaj fingroj per
krimo; via buŝo parolas malveron, via lango esprimas
maljustaĵon. 4 Neniu procesas honeste, kaj neniu
juĝas juste; oni fidas vantaĵon kaj parolas malveron,
gravediĝas per malhonestaĵo kaj naskas krimon. 5
Oni kovas ovojn de vipuro, kaj oni teksas araneaĵon.
Kiu manĝas iom el tiuj ovoj, tiu mortas; kiam oni ilin
disrompas, elaperas vipuro. 6 Ilia teksaĵo ne taŭgos
por vesto, kaj ili ne kovros sin per sia faritaĵo; iliaj
faroj estas faroj pekaj, kaj agoj de rabo estas en iliaj
manoj. 7 Iliaj piedoj kuras al malbono, kaj ili rapidas,
por verŝi senkulpan sangon; iliaj pensoj estas pensoj
pekaj; ruinigo kaj pereigo estas sur ilia vojo. 8 Vojon
de paco ili ne konas, kaj sur iliaj irejoj ne troviĝas
justeco; siajn vojetojn ili kurbigis al si; ĉiu, kiu iras
sur ili, ne konas pacon. 9 Tial malproksimiĝis de ni
justeco, kaj vero ne atingis nin; ni atendas lumon, sed
jen estas mallumo; brilon, sed ni iras en mallumo. 10
Ni palpas la muron kiel blinduloj, kaj ni palpas kiel
senokululoj; en tagmezo ni faletas kiel en krepusko,
en mallumo kiel mortintoj. 11 Ni ĉiuj blekegas kiel
ursoj, kaj ni ĝemas kiel kolomboj; ni atendas justecon,
sed ĝi forestas; savon, sed ĝi estas malproksime de ni.
12 Ĉar multiĝis niaj krimoj antaŭ Vi, kaj niaj pekoj
atestas kontraŭ ni; ĉar niaj krimoj estas kun ni, kaj
niajn pekojn ni konas. 13 Ni krimis kaj mensogis
kontraŭ la Eternulo, kaj ni forturnis nin de nia Dio; ni
parolis pri rabado kaj malbonagado, ni preparis kaj
eligis el la koro vortojn mensogajn. 14 Kaj forturniĝis
malantaŭen la justeco, kaj la virto staras malproksime;
ĉar la vero faletis sur la strato, kaj la ĝusteco ne
povas veni. 15 Kaj la vero estas forigita; kaj prirabata
estas tiu, kiu detenas sin de malbono. Kaj la Eternulo
vidis, kaj Li indignis, ke forestas justeco. 16 Kaj Li
vidis, ke ne troviĝas viro, kaj Li miris, ke ne troviĝas
defendanto; kaj helpis Lin Lia brako, kaj Lia justeco
Lin subtenis. 17 Kaj Li surmetis sur Sin la veron kiel
kirason, kaj la kaskon de savo sur Sian kapon; kaj Li
metis sur Sin veston de venĝo, kaj envolvis Sin en
severecon kiel en mantelon. 18 Laŭ la faroj Li repagos:
koleron al Siaj malamikoj, honton al Siaj malamantoj;
al la insuloj Li repagos, kion ili meritas. 19 Kaj oni
timos en la okcidento la nomon de la Eternulo kaj
en la oriento Lian majeston; ĉar la malamiko venos
kiel rivero, pelata de la spirado de la Eternulo. 20 Kaj
venos Liberiganto por Cion, kaj por tiuj el Jakob, kiuj
retiriĝis de malbonagoj, diras la Eternulo. 21 Kaj Mi
faras kun ili jenan interligon, diras la Eternulo: Mia
spirito, kiu estas sur vi, kaj Miaj vortoj, kiujn Mi metis
en vian buŝon, ne foriĝos de via buŝo nek de la buŝo
de viaj infanoj nek de la buŝo de via plua idaro, de
nun ĝis eterne, diras la Eternulo.

**60** Leviĝu, lumiĝu; ĉar venas via lumo, kaj la majesto
de la Eternulo ekbrilas super vi. 2 Ĉar jen
mallumo kovros la teron, kaj krepusko la popolojn;
sed super vi brilos la Eternulo, kaj Lia majesto aperos
super vi. 3 Kaj popoloj iros al via lumo, kaj reĝoj al la
brilo de viaj radioj. 4 Levu ĉirkaŭen viajn okulojn, kaj
rigardu: ĉiuj ili kolektiĝas kaj iras al vi; viaj filoj venas
de malproksime, kaj viaj filinoj estas portataj sur la
brako. 5 Tiam vi vidos kaj estos ravita, ektremos kaj
vastiĝos via koro; ĉar turniĝos al vi la abundaĵo de
la maro, la riĉaĵoj de la popoloj venos al vi. 6 Multo
da kameloj kovros vin, junaj kameloj el Midjan kaj
Efa; ĉiuj ili venos el Ŝeba, portos oron kaj olibanon,
kaj proklamos laŭdon al la Eternulo. 7 Ĉiuj ŝafoj de
Kedar kolektiĝos ĉe vi; la virŝafoj de Nebajot servos al
vi; favore akceptotaj ili iros sur Mian altaron, kaj la
domon de Mia gloro Mi majestigos. 8 Kiuj ili estas, kiuj
flugas kiel nuboj, kaj kiel kolomboj al siaj kolombujoj?
9 Al Mi celas la insuloj, kaj la ŝipoj de Tarŝiŝ estas

antaŭe, por venigi viajn filojn de malproksime, ilian
arĝenton kaj oron kune kun ili, pro la nomo de la
Eternulo, via Dio, kaj de la Sanktulo de Izrael, ĉar
Li faris vin glora. **10** Kaj fremduloj konstruos viajn
murojn, kaj iliaj reĝoj servos al vi; ĉar en Mia kolero
Mi vin frapis, sed en Mia favoro Mi vin kompatas.
**11** Kaj ĉiam nefermitaj estos viaj pordegoj, nek tage
nek nokte ili estos ŝlosataj; por ke oni venigu al vi la
potencon de la popoloj kaj konduku iliajn reĝojn. **12**
Ĉar popolo aŭ regno, kiu ne servos al vi, pereos, kaj
tiaj popoloj estas tute ekstermotaj. **13** La majesto de
Lebanon venos al vi; cipreso, abio, kaj bukso kuniĝos,
por ornami la lokon de Mia sanktejo; kaj la lokon de
Miaj piedoj Mi faros honorata. **14** Kaj humile venos al
vi la filoj de viaj premantoj, kaj ĵetos sin antaŭ viajn
piedojn ĉiuj, kiuj vin malestimis; kaj oni nomos vin
urbo de la Eternulo, Cion de la Sanktulo de Izrael. **15**
Anstataŭ tio, ke vi estis forlasita kaj malamata kaj
neniu volis preterpasi vin, Mi faros vin fierindaĵo de
la mondo, ĝojo de ĉiuj generacioj. **16** Kaj vi nutros
vin per la lakto de la popoloj kaj per la abundaĵo de
la reĝoj; kaj vi ekscios, ke Mi, la Eternulo, estas via
Savanto kaj via Liberiganto, la Potenculo de Jakob.
**17** Anstataŭ kupro Mi alportos oron, kaj anstataŭ
fero Mi alportos arĝenton, anstataŭ ligno kupron,
kaj anstataŭ ŝtonoj feron; kaj Mi faros via estraro la
pacon kaj viaj administrantoj la justecon. **18** Oni ne
plu aŭdos pri perforto en via lando, pri malfeliĉo kaj
pereigo inter viaj limoj; kaj viajn murojn vi nomos
savo kaj viajn pordegojn laŭda kanto. **19** La suno ne
plu estos por vi lumo de la tago, kaj la brilo de la
luno ne lumos al vi; sed la Eternulo estos por vi lumo
eterna, kaj via Dio estos via gloro. **20** Via suno ne plu
subiros, kaj via luno ne kaŝiĝos; ĉar la Eternulo estos
por vi lumo eterna, kaj la tagoj de via funebro finiĝos.
**21** Kaj via popolo tuta estos justuloj, por eterne ili
ekposedos la teron; tio estas markoto de Mia plantado,
faro de Miaj manoj, per kiu Mi Min gloros. **22** El la
plej malgranda fariĝos milo, kaj el la plej sensignifa
fariĝos potenca popolo; Mi, la Eternulo, rapide faros
tion en ĝia tempo.

**61** La spirito de la Sinjoro, la Eternulo, estas sur mi,
ĉar la Eternulo min sanktoleis, por bonanonci al
mizeruloj; Li sendis min, por bandaĝi tiujn, kies koro
estas vundita, por anonci liberecon al kaptitoj kaj
malŝloson al malliberigitoj, **2** por proklami favorjaron
de la Eternulo kaj venĝotagon de nia Dio, por konsoli
ĉiujn malĝojulojn, **3** por fari al la afliktitoj de Cion,
ke oni donu al ili ornamon anstataŭ cindro, oleon
de ĝojo anstataŭ funebro, veston de gloro anstataŭ
spirito afliktita, kaj ke oni nomu ilin kverkoj de
justeco, plantaĵo de la Eternulo por Lia gloro. **4**
Kaj ili rekonstruos la antikvajn ruinojn, restarigos
la detruitaĵojn de la antaŭa tempo, kaj renovigos
la ruinigitajn urbojn, dezertigitajn antaŭ multe da
generacioj. **5** Stariĝos fremduloj kaj paŝtos viajn ŝafojn,
kaj aligentuloj estos viaj plugistoj kaj vinberistoj. **6**
Kaj vi estos nomataj pastroj de la Eternulo, servantoj
de nia Dio oni nomos vin; la riĉaĵon de popoloj vi
manĝos, kaj per ilia gloro vi gloriĝos. **7** Pro via honto
vi ricevos duoble, pro la malhonoro ili ĝojkantos
sur siaj partoj; duoblaĵon ili ekposedos en sia lando;
ĝojo eterna estos ĉe ili. **8** Ĉar Mi, la Eternulo, amas
justecon, malamas rabadon kaj maljustecon; kaj Mi
fidele donos al ili ilian rekompencon, kaj interligon
eternan Mi faros kun ili. **9** Kaj ilia idaro estos fama
inter la popoloj, kaj iliaj posteuloj inter la nacioj; ĉiuj,
kiuj ilin vidos, konos ilin, ke ili estas semo benita de la
Eternulo. **10** Mi forte ĝojas pri la Eternulo, mia animo
ĝojas pri mia Dio; ĉar Li vestis min per vestoj de savo,
per mantelo de justeco Li min kovris, kiel fianĉon,
kiu sin ornamas per belaĵo, kaj kiel fianĉinon, kiu
metas sur sin siajn ornamaĵojn. **11** Ĉar kiel la tero
eligas siajn kreskaĵojn kaj kiel ĝardeno elkreskigas
siajn semojn, tiel la Sinjoro, la Eternulo, elkreskigos
justecon kaj gloron antaŭ ĉiuj popoloj.

**62** Pro Cion mi ne silentos, kaj pro Jerusalem mi
ne haltos, ĝis ĝia praveco eliĝos kiel brilo kaj ĝia
savo kiel brulanta torĉo. **2** Kaj la popoloj vidos vian
feliĉon, kaj ĉiuj reĝoj vian honoron; kaj oni nomos vin
per nomo nova, kiun eldiros la buŝo de la Eternulo. **3**
Kaj vi estos belega krono en la mano de la Eternulo,
kaj reĝa kapornamo en la manplato de via Dio. **4** Oni
ne plu nomos vin forlasita, kaj pri via lando oni ne
plu diros, ke ĝi estas dezerta; sed oni nomos vin Mia
Favorata kaj vian landon Edzinigitino; ĉar la Eternulo
vin favoras kaj via lando havos edzon. **5** Kiel junulo
prenas por kunvivado junulinon, tiel kunvivos kun
vi viaj filoj; kaj kiel fianĉo ĝojas pri la fianĉino, tiel
ĝojos pri vi via Dio. **6** Sur viaj muregoj, ho Jerusalem,
Mi starigis gardistojn, por ke la tutan tagon kaj la
tutan nokton ili ne eksilentu; vi, kiuj memorigas

pri la Eternulo, ne faru al vi ripozon, 7 kaj al Li ne
donu ripozon, ĝis Li aranĝos kaj faros Jerusalemon
gloro sur la tero. 8 La Eternulo ĵuris per Sia dekstra
mano kaj per Sia potenca brako: Mi ne plu donos vian
grenon kiel manĝaĵon al viaj malamikoj, kaj fremduloj
ne trinkos vian moston, por kiu vi laboris; 9 sed
ĝiaj rikoltantoj ĝin manĝos, kaj laŭdos la Eternulon;
kaj ĝiaj kolektantoj ĝin trinkos en la korto de Mia
sanktejo. 10 Pasu, pasu tra la pordegoj, pretigu vojon
por la popolo; ebenigu, ebenigu la vojon, liberigu ĝin
de ŝtonoj; levu standardon super la popoloj. 11 Jen la
Eternulo aŭdigas ĝis la fino de la tero: Diru al la filino
de Cion: Jen venas via Savanto; jen Lia rekompenco
estas kun Li, kaj Lia repago antaŭ Li. 12 Kaj oni nomos
ilin la sankta popolo, la liberigitoj de la Eternulo; kaj
vin oni nomos urbo multevizitata kaj ne forlasata.

**63** Kiu estas tiu, kiu venas el Edom, en ruĝaj vestoj
el Bocra? tiu majesta en siaj vestoj, klinanta sin
sub la grandeco de sia forto? Tio estas Mi, anoncanta
la veron, potenca por helpi. 2 Kial Via drapiraĵo estas
ruĝa, kaj Viaj vestoj kiel ĉe tretanto en vinpremejo? 3
La premilon Mi sola tretis, kaj el la popoloj neniu estis
kun Mi; Mi tretis ilin en Mia kolero kaj piedpremis
ilin en Mia furiozo; kaj ŝprucis ilia sango sur Mian
veston, kaj Mian tutan drapiraĵon Mi malpurigis. 4
Ĉar la tago de venĝo estas en Mia koro, kaj la jaro de
Miaj liberigotoj venis. 5 Mi rigardis, sed Mi ne trovis
helpanton; Mi miris, sed Mi ne trovis subtenanton;
tiam helpis Min Mia brako, kaj Mia furiozo Min
subtenis. 6 Kaj Mi dispremis popolojn en Mia kolero
kaj ebriigis ilin per Mia furiozo, kaj Mi elverŝis sur la
teron ilian sangon. 7 Mi proklamos la favorkorecon
de la Eternulo, la laŭdon al la Eternulo, pro ĉio, kion
la Eternulo faris por ni, kaj pro la multe da bono,
kiun Li faris al la domo de Izrael konforme al Sia
kompatemeco kaj granda favorkoreco. 8 Kaj Li diris:
Ili estas ja Mia popolo, filoj, kiuj ne perfidas; kaj Li
fariĝis ilia Savanto. 9 En ĉiuj iliaj suferoj Li ankaŭ
suferis, kaj anĝelo de ĉe Li helpis ilin; en Sia amo kaj
en Sia kompato Li liberigis ilin; Li prenis ilin sur Sin
kaj portis ilin en ĉiuj tempoj de la antikveco. 10 Sed
ili ribelis, kaj indignigis Lian sanktan spiriton; tial
Li fariĝis ilia malamiko kaj mem batalis kontraŭ ili.
11 Kaj Lia popolo rememoris la tempon antikvan de
Moseo, dirante: Kie estas Tiu, kiu elkondukis ilin el la
maro kune kun la paŝtanto de Liaj ŝafoj? kie estas Tiu,
kiu metis internen de ili Sian sanktan spiriton? 12 Tiu,
kiu gvidis per Sia majesta brako la dekstran manon
de Moseo? Tiu, kiu disfendis antaŭ ili la akvon, por
fari al Si nomon eternan? 13 Tiu, kiu kondukis ilin
tra la abismoj kiel ĉevalon tra la dezerto, kaj ili ne
falpuŝiĝis? 14 Kiel brutaro malsupreniras en la valon
kaj la spirito de la Eternulo donas al ĝi ripozon, tiel Vi
kondukis Vian popolon, por fari al Vi gloran nomon.
15 Rigardu el la ĉielo kaj vidu el Via sankta kaj majesta
loĝejo: kie estas Via fervoro kaj potenco? Via granda
interno kaj Via kompato fortiriĝis de mi. 16 Vi estas
ja nia patro; Abraham ja ne scias pri ni, kaj Izrael
nin ne rekonas; Vi, ho Eternulo, estas nia patro; nia
Liberiganto — tia estas de eterne Via nomo. 17 Kial,
ho Eternulo, Vi permesis al ni forvagi de Viaj vojoj,
obstinigis nian koron, ke ni Vin ne respektu? Returnu
Vin pro Viaj servantoj, pro Viaj heredaj triboj. 18
Ne longe posedis Via sankta popolo; niaj malamikoj
dispremis per la piedoj Vian sanktejon. 19 Ni fariĝis
kiel tiuj, kiujn Vi neniam regis, kiuj neniam estis
nomataj per Via nomo.

**64** Ho, se Vi disfendus la ĉielon kaj malsuprenirus,
antaŭ Vi ektremus la montoj; 2 aperu kiel fajro,
kiu bruligas lignerojn, kiel akvo, kiu bolas de fajro,
por konigi Vian nomon al Viaj malamikoj; antaŭ Via
vizaĝo ektremu la popoloj! 3 Kiam Vi faris miraklojn,
kiujn ni ne atendis, kiam Vi malsupreniris, antaŭ
Vi ektremis la montoj. 4 Neniam oni tion aŭdis, ne
eksciis per la orelo, nek okulo tion vidis, ke iu dio
krom Vi tion faras por tiuj, kiuj esperas je li. 5 Vi
renkontis tiujn, kiuj ĝoje faris justaĵon kaj memoris
Vin sur Viaj vojoj; kvankam Vi koleris, kiam ni pekis,
tamen per ili ni ĉiam estis savataj. 6 Ni ĉiuj fariĝis
kiel malpuruloj, kaj nia tuta virto estas kiel makulita
vesto; ni ĉiuj velkas kiel folio, kaj niaj pekoj portas
nin kiel vento. 7 Kaj neniu vokas Vian nomon, nek
vekiĝas, por forte sin teni je Vi; ĉar Vi kovris Vian
vizaĝon antaŭ ni kaj lasas nin perei per niaj pekoj. 8
Sed nun, ho Eternulo, Vi estas nia Patro; ni estas la
argilo, kaj Vi estas nia formanto, kaj ni ĉiuj estas la
produkto de Via mano. 9 Ne koleru, ho Eternulo, tro
forte, kaj ne eterne memoru la kulpon; ho, rigardu,
ni ĉiuj estas Via popolo. 10 Viaj sanktaj urboj fariĝis
dezerto, Cion fariĝis dezerto, Jerusalem ruino. 11
Nia sankta kaj belega domo, en kiu niaj patroj Vin
laŭdadis, estas forbruligita per fajro, kaj ĉiuj niaj

dezirindaĵoj fariĝis ruinoj. 12 Ĉu malgraŭ ĉio ĉi tio Vi
retenos Vin, ho Eternulo? ĉu Vi silentos kaj tiel forte
nin premos?

**65** Mi estis preta respondi al tiuj, kiuj tion ne petis;
Mi estis trovebla por tiuj, kiuj Min ne serĉis; al
popolo, kiu ne vokis Mian nomon, Mi diris: Jen Mi
estas, jen Mi estas. 2 Ĉiutage Mi etendis Miajn manojn
al popolo obstina, al tiuj, kiuj iras vojon malbonan,
laŭ siaj intencoj; 3 al popolo, kiu konstante indignigas
Min antaŭ Mia vizaĝo; al homoj, kiuj buĉas oferojn
en ĝardenoj kaj incensas sur brikoj; 4 al homoj, kiuj
sidas inter la tomboj kaj noktas en kavernoj, manĝas
viandon de porko, kaj havas abomenindan supon en
siaj vazoj; 5 kiuj diras: Iru for, ne alproksimiĝu al
mi, ĉar mi estas pli sankta ol vi. Tiuj estas fumo por
Mia nazo, fajro brulanta la tutan tagon. 6 Tio estas
enskribita antaŭ Mi: Mi ne eksilentos, ĝis Mi repagos;
kaj Mi repagos sur ilian bruston 7 viajn kulpojn kaj
kune ankaŭ la kulpojn de viaj patroj, diras la Eternulo,
kiuj incensis sur la montoj kaj ofendis Min sur la
montetoj; kaj Mi remezuros al ili iliajn antaŭajn farojn
sur ilian bruston. 8 Tiele diras la Eternulo: Kiel se en
vinberaro troviĝas mosto, oni diras: Ne difektu ĝin,
ĉar en ĝi estas beno, tiel Mi agos pro Miaj servantoj,
ke Mi ne pereigu ĉiujn. 9 Kaj Mi elirigos el Jakob
semon kaj el Jehuda heredanton de Miaj montoj,
kaj heredos ilin Miaj elektitoj, kaj Miaj servantoj tie
loĝos. 10 Kaj Ŝaron estos paŝtejo de ŝafoj, kaj la valo
Aĥor kuŝejo de bovoj por Mia popolo, kiu serĉas Min.
11 Sed vin, kiuj forlasis la Eternulon, forgesis Mian
sanktan monton, aranĝas tablon por la Feliĉo, kaj
faras verŝon por la Destino — 12 vin Mi destinos por
la glavo, kaj ĉiuj vi genuos por la buĉo, pro tio, ke
Mi vokis kaj vi ne respondis, Mi parolis kaj vi ne
aŭskultis, kaj vi faris malbonon antaŭ Miaj okuloj,
kaj elektis tion, kio ne plaĉis al Mi. 13 Tial tiele diras
la Sinjoro, la Eternulo: Jen Miaj servantoj manĝos,
kaj vi malsatos; Miaj servantoj trinkos, kaj vi soifos;
Miaj servantoj ĝojos, kaj vi hontos; 14 Miaj servantoj
kantos pro kora gajeco, kaj vi krios pro kora doloro
kaj ploros pro aflikto de spirito. 15 Kaj vi donos vian
nomon al Miaj elektitoj por malbeno, kaj la Sinjoro,
la Eternulo, vin mortigos; sed Siajn servantojn Li
nomos per alia nomo. 16 Kiu sin benos sur la tero, tiu
benos sin per la Dio vera; kaj kiu ĵuros sur la tero, tiu
ĵuros per la Dio vera; ĉar forgesitaj estos la antaŭaj
suferoj kaj forkaŝiĝos antaŭ Miaj okuloj. 17 Ĉar jen Mi
kreos novan ĉielon kaj novan teron; kaj la antaŭaĵo
ne estos rememorigata, kaj oni ne pensos pri ĝi. 18
Kaj vi nur ĝojos kaj estos gajaj ĉiam pri tio, kion Mi
kreos; ĉar jen Mi kreos Jerusalemon por ĝojo kaj ĝian
popolon por gajeco. 19 Kaj Mi ĝojos pri Jerusalem, kaj
Mi estos gaja pri Mia popolo; kaj oni ne plu aŭdos
en ĝi voĉon de ploro, nek voĉon de plendo. 20 Ne
plu estos tie infano aŭ maljunulo, kiu ne atingus la
plenecon de siaj tagoj; ĉar junulo mortos en la aĝo
de cent jaroj, kaj pekulo estos malbenata per aĝo
centjara. 21 Ili konstruos domojn kaj loĝos en ili; ili
plantos vinberĝardenojn kaj manĝos iliajn fruktojn.
22 Ili ne konstruos, ke alia loĝu; ili ne plantos, ke alia
manĝu; ĉar kiel la tagoj de arbo estas la tagoj de
Mia popolo, kaj Miaj elektitoj eluzos la produktojn
de siaj manoj ĝis plena malnoviĝo. 23 Ili ne laboros
vane kaj ne naskos por pereo; ĉar ili estos semo de
benitoj de la Eternulo, kaj iliaj posteuloj kun ili. 24
Kaj estos tiel, ke antaŭ ol ili vokos, Mi respondos; ili
estos ankoraŭ parolantaj, kaj Mi jam aŭdos. 25 Lupo
kaj ŝafido paŝtiĝos kune, leono simile al bovo manĝos
pajlon, kaj manĝaĵo de serpento estos polvo. Ili ne
faros malbonon nek difekton sur Mia tuta sankta
monto, diras la Eternulo.

**66** Tiele diras la Eternulo: La ĉielo estas Mia trono,
kaj la tero estas Mia piedbenketo; kie do estos
la domo, kiun vi konstruos por Mi? kaj kie estos
la loko por Mia ripozo? 2 Ĉion tion faris ja Mia
mano, kaj tiel ĉio fariĝis, diras la Eternulo. Nur
tion Mi rigardas: humilulon kaj spirite-afliktiton, kiu
respektegas Mian vorton. 3 Unu buĉas bovon, alia
mortigas homon; unu buĉoferas ŝafidon, alia rompas
la kolon al hundo; unu alportas farunoferon, alia
sangon de porko; unu incensas olibanon, alia preĝas al
idolo. Sed kiel ili elektis al si siajn vojojn kaj ilia animo
ĝuas ilian abomenindaĵon, 4 tiel ankaŭ Mi elektos por
ili petolantojn kaj venigos sur ilin tion, kion ili timis;
ĉar Mi vokis, kaj neniu respondis; Mi parolis, kaj ili ne
aŭskultis; sed ili faris malbonon antaŭ Miaj okuloj, kaj
elektis tion, kio ne plaĉis al Mi. 5 Aŭskultu la parolon
de la Eternulo, vi, kiuj respektegas Lian parolon: Viaj
fratoj, kiuj vin malamas kaj forpuŝas pro Mia nomo,
diras: La Eternulo montru Sian gloron, por ke ni
vidu vian ĝojon! Sed ili estos hontigitaj. 6 Aŭdiĝas
brua voĉo el la urbo, voĉo el la templo, voĉo de la

Eternulo, kiu repagas merititaĵon al Siaj malamikoj.
7 Antaŭ ol ŝi eksentis dolorojn, ŝi naskis; antaŭ ol
venis al ŝi la akuŝiĝaj suferoj, ŝi elfaligis filon. 8 Kiu
aŭdis ion similan? kiu vidis ion similan? ĉu la tero
naskas en unu tago? ĉu naskiĝas popolo per unu fojo,
kiel, apenaŭ eksentinte naskajn dolorojn, tuj naskis
Cion siajn filojn? 9 Ĉu Mi, malfermante la uteron,
ne lasus naski? diras la Eternulo. Ĉu Mi, kiu pretigis
la naskon, mem ĝin haltigus? diras via Dio. 10 Ĝoju
kun Jerusalem kaj estu gajaj pri ĝi ĉiuj ĝiaj amantoj;
forte ĝoju pri ĝi ĉiuj, kiuj ploris pri ĝi. 11 Suĉu kaj
satiĝu el la brusto de ĝiaj konsoloj; suĉu kaj ĝuu la
abundon de ĝia gloro. 12 Ĉar tiele diras la Eternulo:
Jen Mi fluigos sur ĝin pacon kiel riveron, kaj la riĉaĵon
de la popoloj kiel disverŝiĝintan torenton, por ke vi
suĉu; sur la brakoj vi estos portataj, kaj sur la genuoj
vi estos dorlotataj. 13 Kiel homon, kiun konsolas lia
patrino, tiel Mi vin konsolos; kaj en Jerusalem vi estos
konsolataj. 14 Kaj vi vidos, kaj ĝojos via koro, kaj
viaj ostoj vigliĝos kiel freŝa verdaĵo; kaj la mano de
la Eternulo fariĝos konata al Liaj servantoj, kaj Lia
kolero al Liaj malamikoj. 15 Ĉar jen la Eternulo venos
en fajro, kaj Lia ĉaro estos kiel ventego, por elverŝi en
ardo Sian koleron kaj en flama fajro Sian indignon. 16
Ĉar per fajro kaj glavo la Eternulo faros juĝon super
ĉiu karno; kaj multaj estos la frapitoj de la Eternulo.
17 Tiuj, kiuj sanktigas kaj purigas sin por la ĝardenoj,
starante post unu en la mezo, kiuj manĝas viandon
de porko kaj abomenindaĵon kaj musojn, ĉiuj kune
estos ekstermitaj, diras la Eternulo. 18 Kaj por Mi,
pro iliaj faroj kaj intencoj, venis la tempo kolekti
ĉiujn popolojn kaj gentojn, por ke ili venu kaj vidu
Mian gloron. 19 Kaj Mi faros sur ili signon, kaj la
saviĝintojn el ili Mi sendos al la popoloj Tarŝiŝ, Pul,
kaj Lud, al la streĉantoj de pafarkoj, al Tubal kaj Javan,
sur la malproksimajn insulojn, kiuj ne aŭdis la famon
pri Mi kaj ne vidis Mian gloron; kaj ili proklamos
Mian gloron inter la popoloj. 20 Kaj ili venigos ĉiujn
viajn fratojn el inter ĉiuj popoloj kiel donacon al
la Eternulo, sur ĉevaloj kaj ĉaroj, en veturiloj, kaj
sur muloj kaj kameloj, sur Mian sanktan monton en
Jerusalemon, diras la Eternulo, simile al tio, kiel la
Izraelidoj alportadis la donacojn en la domon de la
Eternulo en pura vazo. 21 Kaj el ili Mi prenos al Mi
pastrojn kaj Levidojn, diras la Eternulo. 22 Ĉar kiel
la nova ĉielo kaj la nova tero, kiujn Mi kreos, staros
antaŭ Mi, diras la Eternulo, tiel staros via idaro kaj
via nomo. 23 Kaj regule en ĉiu monatkomenco kaj
en ĉiu sabato venos ĉiu karno, por adorkliniĝi antaŭ
Mi, diras la Eternulo. 24 Kaj ili eliros kaj vidos la
kadavrojn de la homoj, kiuj malbonagis kontraŭ Mi;
ĉar ilia vermo ne mortos kaj ilia fajro ne estingiĝos,
kaj ili estos abomenindaĵo por ĉiu karno.

# Jeremia

**1** Paroloj de Jeremia, filo de Ĥilkija, el la pastroj, kiuj estis en Anatot, en la lando de Benjamen; **2** al kiu aperis la vorto de la Eternulo en la tempo de Joŝija, filo de Amon, reĝo de Judujo, en la dek-tria jaro de lia reĝado, **3** kaj poste en la tempo de Jehojakim, filo de Joŝija, reĝo de Judujo, ĝis la fino de la dek-unua jaro de Cidkija, filo de Joŝija, reĝo de Judujo, ĝis la forkonduko de la Jerusalemanoj en la kvina monato. **4** Aperis al mi la vorto de la Eternulo, dirante: **5** Antaŭ ol Mi formis vin en la utero, Mi vin konis, kaj antaŭ ol vi eliris el la ventro, Mi vin sanktigis, Mi faris vin profeto por la popoloj. **6** Mi diris: Ho ve, Sinjoro, ho Eternulo! mi ne povoscias paroli, ĉar mi estas juna. **7** Sed la Eternulo diris al mi: Ne diru, ke vi estas juna; sed ĉien, kien Mi sendos vin, iru, kaj ĉion, kion Mi ordonos al vi, parolu. **8** Ne timu ilin; ĉar Mi estas kun vi, por savi vin, diras la Eternulo. **9** Kaj la Eternulo etendis Sian manon kaj ektuŝis mian buŝon, kaj la Eternulo diris al mi: Jen Mi enmetis Miajn vortojn en vian buŝon. **10** Vidu, Mi starigas vin hodiaŭ super la popoloj kaj super la regnoj, por elŝiri, rompi, pereigi, kaj detrui, por konstrui kaj planti. **11** Kaj aperis al mi la vorto de la Eternulo, dirante: Kion vi vidas, Jeremia? Kaj mi diris: Mi vidas bastonon maldormantan. **12** Kaj la Eternulo diris al mi: Vi vidis bone; ĉar Mi maldormos pri Mia vorto, por plenumi ĝin. **13** Kaj duafoje aperis al mi la vorto de la Eternulo, dirante: Kion vi vidas? Kaj mi diris: Mi vidas flame bolantan poton, kaj ĝi rigardas de norde. **14** Kaj la Eternulo diris al mi: De norde venos la malfeliĉo sur ĉiujn loĝantojn de la lando. **15** Ĉar jen Mi alvokos ĉiujn gentojn de la nordaj regnoj, diras la Eternulo, kaj ili venos kaj starigos ĉiu sian tronon antaŭ la pordegoj de Jerusalem kaj ĉirkaŭ ĝiaj muregoj kaj antaŭ ĉiuj urboj de Judujo. **16** Kaj Mi eldiros Mian verdikton pri ili pro ĉiuj iliaj malbonagoj, pro tio, ke ili forlasis Min kaj incensis al aliaj dioj kaj adorkliniĝis antaŭ la faritaĵo de siaj manoj. **17** Kaj vi zonu viajn lumbojn, leviĝu, kaj diru al ili ĉion, kion Mi ordonas al vi; ne tremu antaŭ ili, por ke Mi ne tremigu vin antaŭ ili. **18** Jen Mi faras vin hodiaŭ fortikigita urbo, fera kolono, kaj kupraj muroj en la tuta lando, kontraŭ la reĝoj de Judujo, kontraŭ ĝiaj princoj, kontraŭ ĝiaj pastroj, kaj kontraŭ la popolo de la lando. **19** Ili batalos kontraŭ vi, sed ne venkos vin; ĉar Mi estas kun vi, diras la Eternulo, por savi vin.

**2** Kaj aperis al mi la vorto de la Eternulo, dirante: **2** Iru kaj prediku al la oreloj de Jerusalem, dirante: Tiele diras la Eternulo: Mi memoras la piecon de via juneco, la amon de via fianĉineco, kiam vi sekvis Min en la dezerto, en lando ne prisemita. **3** Izrael tiam estis sanktaĵo de la Eternulo, Lia unua frukto; ĉiuj, kiuj manĝis ĝin, estis kondamnitaj, malbono venis sur ilin, diras la Eternulo. **4** Aŭskultu la vorton de la Eternulo, ho domo de Jakob kaj ĉiuj familioj de la domo de Izrael. **5** Tiele diras la Eternulo: Kian maljustaĵon viaj patroj trovis en Mi, ke ili malproksimiĝis de Mi kaj sekvis vantaĵon kaj mem vantiĝis? **6** Kaj ili ne diris: Kie estas la Eternulo, kiu elkondukis nin el la Egipta lando, kiu kondukis nin tra dezerto, tra lando de stepoj kaj kavoj, tra lando seka kaj malluma, tra lando, kiun neniu trapasis kaj kie neniu loĝis? **7** Kaj Mi venigis vin en landon fruktodonan, por ke vi manĝu ĝiajn fruktojn kaj bonaĵojn; sed vi venis kaj malpurigis Mian landon, kaj Mian heredaĵon vi faris abomenindaĵo. **8** La pastroj ne diris: Kie estas la Eternulo? la leĝokompetentuloj ne atentis Min, la paŝtistoj perfidis Min, la profetoj profetis per Baal kaj sekvis idolojn. **9** Pro tio Mi ankoraŭ procesos kun vi, diras la Eternulo, kaj kun la filoj de viaj filoj Mi procesos. **10** Ĉar iru sur la insulojn de la Kitidoj kaj rigardu, sendu al la Kedaridoj kaj esploru bone kaj rigardu, ĉu tie estas farita io simila. **11** Ĉu ia popolo ŝanĝis siajn diojn, kvankam ili ne estas dioj? sed Mia popolo ŝanĝis sian gloron je idoloj. **12** Miregu pri tio, ho ĉielo, sentu teruron kaj forte konsterniĝu, diras la Eternulo. **13** Ĉar du malbonagojn faris Mia popolo: Min ili forlasis, la fonton de viva akvo, por elhaki al si putojn, truhavajn putojn, kiuj ne povas teni akvon. **14** Ĉu Izrael estas sklavo, aŭ ĉu li estas infano de la domo? kial li fariĝis rabitaĵo? **15** Kontraŭ li blekegis leonidoj, forte kriis, kaj ili faris lian landon dezerto; liaj urboj estas bruligitaj, kaj neniu loĝas en ili. **16** Eĉ la filoj de Nof kaj de Taĥpanĥes frakasis vian verton. **17** Vi jam mem tion faris al vi, ĉar vi forlasis la Eternulon, vian Dion, en la tempo, kiam Li gvidis vin sur la vojo. **18** Kaj nun por kio vi bezonas la vojon al Egiptujo? ĉu por trinki la akvon de Nilo? Kaj por kio vi bezonas la vojon al Asirio? ĉu por trinki la akvon de Eŭfrato? **19** Via malboneco vin punos, kaj viaj malbonagoj faros al vi riproĉojn, por ke vi sciu kaj vidu, kiel malbone kaj maldolĉe estas, ke vi forlasis la Eternulon, vian Dion, kaj ne timas

Min, diras la Sinjoro, la Eternulo Cebaot. 20 Ĉar
antaŭ longe vi rompis vian jugon kaj disŝiris viajn
ŝnurojn, kaj vi diris: Mi ne plu malbonagos; tamen
sur ĉiu alta loko kaj sub ĉiu verda arbo vi kuŝigis
vin kiel malĉastistino. 21 Mi plantis vin kiel bonegan
vinberbranĉon, portontan plej ĝustajn fruktojn; kiel
do vi ŝanĝiĝis ĉe Mi je vinberbranĉo sovaĝa? 22 Se
vi eĉ lavus vin per natro kaj uzus por vi multe da
sapo, via malvirto tamen restos makula antaŭ Mi,
diras la Sinjoro, la Eternulo. 23 Kiel vi povas diri: Mi
ne malpurigis min, mi ne sekvis Baalojn? rigardu
vian agadon en la valo, pripensu, kion vi faris, juna
kamelino rapidpieda, petolanta sur sia vojo. 24 Kiu
povas reteni sovaĝan azeninon, alkutimiĝintan al la
dezerto, kiam ĝi sopiregas de sia volupta celado? ĉiuj,
kiuj ĝin serĉas, ne bezonas laciĝi, en la sama stato ili
ĝin trovos. 25 Detenu viajn piedojn de nudeco kaj vian
gorĝon de soifo. Sed vi diras: Ne, mi ne volas, ĉar mi
amas fremdulojn kaj mi sekvos ilin. 26 Kiel ŝtelinto
hontas, kiam oni lin trovas, tiel estas hontigita la
domo de Izrael, ili, iliaj reĝoj, iliaj princoj, iliaj pastroj,
kaj iliaj profetoj, 27 kiuj diras al ligno: Vi estas mia
patro; kaj al ŝtono: Vi min naskis. Ili turnis al Mi la
nukon, ne la vizaĝon; sed en la tempo de sia malfeliĉo
ili diras: Leviĝu, kaj savu nin. 28 Kie do estas viaj dioj,
kiujn vi faris al vi? ili leviĝu, se ili povas vin savi en la
tempo de via malfeliĉo; ĉar kiom da urboj, tiom da
dioj vi havas, ho Jehuda. 29 Kial vi volas disputi kun
Mi? vi ĉiuj defalis de Mi, diras la Eternulo. 30 Vane Mi
frapis viajn infanojn, ili ne akceptis la moralinstruon;
via glavo ekstermis viajn profetojn, kiel furioza leono.
31 Ho generacio, atentu la vorton de la Eternulo! Ĉu Mi
estis por Izrael dezerto aŭ lando malluma? Kial do Mia
popolo diras: Ni mem estas sinjoroj, ni ne plu iros al
Vi? 32 Ĉu virgulino forgesas sian ornamon, aŭ fianĉino
sian ĉirkaŭligon? sed Mia popolo Min forgesis jam
de tempo nekalkulebla. 33 Kiel vi beligas vian vojon,
por serĉi amon! al agoj malbonaj vi ja alkutimiĝis. 34
Eĉ sur viaj baskoj oni trovas sangon de malriĉuloj,
senkulpuloj; ne en foskavoj Mi tion trovis, sed sur ĉiuj
tiuj lokoj. 35 Vi diras: Mi estas senkulpa, Lia kolero
deturnu sin de mi. Sed Mi postulos juĝon inter ni pro
tio, ke vi diras: Mi ne pekis. 36 Kiel malestiminda vi
fariĝis, ŝanĝante vian vojon! De Egiptujo vi estos tiel
same hontigita, kiel vi estas hontigita de Asirio. 37
Ankaŭ el tie vi eliros kun la manoj sur la kapo, ĉar la
Eternulo forpuŝis viajn esperojn kaj vi ne sukcesos
kun ili.

3 Oni diras: Se viro forigas sian edzinon, kaj ŝi foriras
de li kaj edziniĝas kun alia viro, ĉu li tiam povas
reveni al ŝi denove? ĉu ne malpuriĝus per tio tiu
lando? Kaj vi malĉastis kun multaj amantoj; tamen
revenu al Mi, diras la Eternulo. 2 Levu viajn okulojn al
la altaĵoj, kaj rigardu; kie vi ne adultis? Ĉe la vojoj vi
sidis por ili, kiel Arabo en la dezerto, kaj vi malpurigis
la landon per via malĉastado kaj malbonagoj. 3 Pro
tio estas retenitaj la pluvoj, kaj la printempa pluvo
ne aperis; sed vi havas frunton de malĉastistino, vi
ne plu volas honti. 4 Tamen vi kriis al Mi: Mia patro,
Vi, gvidinto de mia juneco! 5 ĉu Vi koleros eterne
kaj konservos la koleron por ĉiam? Tiel vi parolas,
kaj tamen vi faras malbonon kaj kontraŭstaras. 6 La
Eternulo diris al mi en la tempo de la reĝo Joŝija:
Ĉu vi vidis, kion faris la defalinta Izrael? ŝi iris sur
ĉiun altan monton kaj sub ĉiun verdan arbon kaj tie
malĉastis. 7 Kaj post kiam ŝi faris ĉion ĉi tion, Mi
diris: Revenu al Mi; sed ŝi ne revenis. Kaj tion vidis ŝia
perfidema fratino Judujo. 8 Mi vidis ĉiujn adultaĵojn
de la defalinta Izrael, kaj Mi forpelis ŝin kaj donis al ŝi
eksedzigan leteron; tamen ne ektimis ŝia perfidema
fratino Judujo, sed ŝi iris kaj ankaŭ malĉastis. 9 Kaj
de la bruo de ŝia malĉastado malpuriĝis la lando, kaj
ŝi adultis kun ŝtono kaj kun ligno. 10 Kaj malgraŭ
ĉio ŝia perfidema fratino Judujo revenis al Mi ne per
sia tuta koro, sed nur hipokrite, diras la Eternulo. 11
Kaj la Eternulo diris al mi: La defalinta Izrael estas
piulino en komparo kun la perfidema Judujo. 12 Iru,
kaj proklamu ĉi tiujn vortojn norden, kaj diru: Revenu,
defalinta Izrael, diras la Eternulo; Mi ne forturnos
de vi Mian vizaĝon, ĉar Mi estas kompatema, diras
la Eternulo, Mi ne koleros eterne. 13 Nur konfesu
vian kulpon, ke vi pekis kontraŭ la Eternulo, via Dio,
kaj kuradis al aliaj sub ĉiun verdan arbon, kaj Mian
voĉon vi ne aŭskultis, diras la Eternulo. 14 Revenu,
defalintaj infanoj, diras la Eternulo, ĉar Mi estas via
sinjoro, kaj Mi prenos vin po unu el urbo kaj po du el
tribo kaj venigos vin en Cionon. 15 Kaj Mi donos al vi
paŝtistojn laŭ Mia koro, kiuj paŝtos vin kun sciado
kaj saĝeco. 16 Kaj kiam vi kreskos kaj multiĝos en
la lando en tiu tempo, diras la Eternulo, oni ne plu
parolos pri la kesto de interligo de la Eternulo; ĝi
ne venos en la koron, oni ne rememoros ĝin, oni ne

serĉos ĝin, oni ne faros ĝin denove. 17 En tiu tempo
oni nomos Jerusalemon trono de la Eternulo, kaj tie
kolektiĝos ĉiuj popoloj en la nomo de la Eternulo,
en Jerusalem, kaj ili ne plu sekvos la logojn de sia
malbona koro. 18 En tiu tempo la domo de Jehuda
iros al la domo de Izrael, kaj ili kune iros el la norda
lando en la landon, kiun Mi donis kiel heredaĵon al
viaj patroj. 19 Mi diris: Kiamaniere Mi alkalkulos vin
al la filoj, kaj donos al vi la ĉarman landon, la plej
belan heredaĵon inter multe da popoloj? Kaj Mi diris:
Vi nomos Min patro, kaj vi ne fordeturnos vin de Mi.
20 Sed kiel virino, kiu perfidis sian amanton, tiel vi
perfidis Min, ho domo de Izrael, diras la Eternulo. 21
Voĉo estas aŭdata sur la altaĵoj, plenda plorado de la
filoj de Izrael, ĉar ili malvirtigis sian vojon, forgesis la
Eternulon, sian Dion. 22 Revenu, defalintaj infanoj;
Mi resanigos vian defalon. Jen ni venis al Vi, ĉar Vi
estas la Eternulo, nia Dio. 23 Vere, mensogo estis en la
altaĵoj, en la multo da montoj; nur en la Eternulo, nia
Dio, estas la savo de Izrael. 24 La hontindaĵo formanĝis
la penadon de niaj patroj de post nia juneco: iliajn
ŝafojn, iliajn bovojn, iliajn filojn, kaj iliajn filinojn. 25
Ni kuŝu en nia abomenindaĵo, kaj nia hontindaĵo nin
kovru; ĉar kontraŭ la Eternulo, nia Dio, ni pekis, ni kaj
niaj patroj, de nia juneco ĝis la nuna tago, kaj ni ne
aŭskultis la voĉon de la Eternulo, nia Dio.

4 Se vi volas rekonverti vin, ho Izrael, diras la
Eternulo, rekonvertu vin al Mi; kaj se vi forigos
viajn abomenindaĵojn de antaŭ Mia vizaĝo, kaj ne
plu vagados, 2 kaj se vi en vero, bonordo, kaj pieco
ĵuros: Kiel la Eternulo vivas, tiam ankaŭ la popoloj
benos sin per Li kaj gloros sin per Li. 3 Ĉar tiele diras
la Eternulo al la viroj de Judujo kaj al Jerusalem:
Plugu al vi novan plugokampon, kaj ne semu inter
dornaĵo. 4 Cirkumcidu vin al la Eternulo kaj forigu la
prepucion de via koro, ho viroj de Judujo kaj loĝantoj
de Jerusalem, por ke Mia kolero ne eliru kiel fajro
kaj ne brulu pro viaj malbonagoj tiel, ke neniu ĝin
estingos. 5 Proklamu en Judujo, aŭdigu en Jerusalem,
prediku kaj trumpetu en la lando; voku per plena
voĉo, kaj diru: Kolektiĝu, kaj ni iru en la fortikigitajn
urbojn. 6 Levu standardon en Cion, kuru, ne haltu; ĉar
malfeliĉon Mi venigas de nordo kaj grandan pereon. 7
Leono leviĝas el sia densejo, kaj pereiganto de popoloj
elmoviĝas kaj eliras el sia loko, por fari vian landon
dezerto; viaj urboj estos detruitaj, kaj neniu loĝos
en ili. 8 Pro tio zonu vin per sakaĵo, ploru kaj ĝemu,
ĉar la flama kolero de la Eternulo ne foriĝas de ni.
9 En tiu tago, diras la Eternulo, senviviĝos la koro
de la reĝo kaj la koro de la princoj, konsterniĝos la
pastroj, kaj la profetoj konfuziĝos. 10 Kaj mi diris: Ho
Sinjoro, ho Eternulo! ĉu Vi erarigis ĉi tiun popolon
kaj Jerusalemon, dirinte: Vi havos pacon — kaj dume
la glavo atingis jam la animon? 11 En tiu tempo oni
diros al tiu popolo kaj al Jerusalem: Seka vento de la
altaĵoj en la dezerto venas sur la vojon de la filino
de Mia popolo, ne por ventumi kaj ne por purigi; 12
vento pli forta ol ili venos al Mi; tiam Mi diros Mian
verdikton kontraŭ ili. 13 Jen ĝi leviĝas kiel nuboj, kaj
ĝiaj ĉaroj estas kiel ventegoj, ĝiaj ĉevaloj estas pli
rapidaj ol agloj; ve al ni! ni estos ruinigitaj. 14 Lavu de
la malbono vian koron, ho Jerusalem, por ke vi saviĝu;
ĝis kiam loĝos en vi viaj malbonaj pensoj? 15 Venas
voko el la regiono de Dan, kaj malbona sciigo de la
monto de Efraim: 16 Sciigu al la popoloj, aŭdigu pri
Jerusalem, ke sieĝontoj venas el lando malproksima
kaj sonigas sian voĉon kontraŭ la urboj de Judujo.
17 Kiel kampogardistoj ili ĉirkaŭas ĝin, ĉar ĝi ribelis
kontraŭ Mi, diras la Eternulo. 18 Via konduto kaj
viaj faroj kaŭzis tion al vi, tiu via malboneco, ĉar
ĝi estas maldolĉa, ĉar ĝi penetris ĝis via koro. 19
Mia internaĵo, mia internaĵo min doloras, batas mia
koro, mi ne povas silenti; ĉar vi, mia animo, aŭdis
sonon de korno, trumpetadon de batalo. 20 Estas
proklamata malfeliĉo post malfeliĉo, ĉar la tuta lando
estas ruinigata, subite estas detruataj miaj domoj,
momente miaj tendoj. 21 Kiel longe ankoraŭ mi vidos
standardon, aŭdos sonadon de korno? 22 Ĉar Mia
popolo estas freneza, Min ili ne rekonas; ili estas
malsaĝaj infanoj, ili ne komprenas; saĝaj ili estas por
fari malbonon, sed fari bonon ili ne povoscias. 23 Mi
rigardas la teron, kaj jen ĝi estas malplena kaj dezerta;
la ĉielon, kaj jen ĝi estas senluma. 24 Mi rigardas la
montojn — ili tremas, kaj ĉiuj montetoj ŝanceliĝas. 25
Mi rigardas — troviĝas neniu homo, kaj ĉiuj birdoj de
la ĉielo disflugis. 26 Mi rigardas — la fruktoriĉa lando
fariĝis dezerto, kaj ĉiuj ĝiaj urboj estas detruitaj de la
Eternulo, de la flamo de Lia kolero. 27 Ĉar tiele diras
la Eternulo: Dezertigita estos la tuta lando, sed plenan
ekstermon Mi ne faros. 28 Pro tio la tero ploros kaj la
ĉielo supre malĝojos; ĉar Mi eldiris Mian decidon,
kaj Mi ne bedaŭras, kaj Mi ne reprenos ĝin. 29 Pro la
bruo de la rajdantoj kaj pafantoj forkuras la tuta urbo;

oni kuras en densajn arbarojn, grimpas sur rokojn;
ĉiuj urboj malpleniĝis, kaj neniu en ili loĝas. 30 Kaj
vi, dezertigita, kion vi faros? Eĉ se vi metos sur vin
purpuron, se vi ornamos vin per oraj ornamoj, se vi
ruĝe kolorigos vian vizaĝon, vi ornamos vin vane: viaj
amantoj vin malestimos, ili volos vin mortigi. 31 Ĉar
Mi aŭdas krion kiel de naskantino, ĝemegadon kiel de
virino naskanta la unuan infanon, krion de la filino
de Cion; ŝi ĝemas, kaj etendas siajn manojn: Ho ve al
mi! ĉar mia animo pereas de la mortigantoj.

5 Trairu la stratojn de Jerusalem kaj rigardu, esploru
kaj serĉu sur ĝiaj palacoj, ĉu vi trovos homon, kiu
agas juste, kiu serĉas la veron — tiam Mi pardonos
al ĝi. 2 Eĉ se ili diras: Mi ĵuras per la Eternulo —
ili tamen ĵuras mensoge. 3 Ho Eternulo, Viaj okuloj
rigardas ja la fidelecon; Vi batas ilin, sed ili ne sentas
doloron; Vi preskaŭ pereigas ilin, sed ili ne volas preni
moralinstruon; sian vizaĝon ili faris pli malmola ol
roko, ili ne volas konvertiĝi. 4 Mi diris al mi: Eble ili
estas malriĉuloj, malkleruloj, ili ne konas la vojon
de la Eternulo, la leĝojn de sia Dio; 5 mi iros al la
eminentuloj, kaj mi parolos kun ili: ili ja konas la
vojon de la Eternulo, la leĝojn de sia Dio; sed ankaŭ ili
ĉiuj kune rompis la jugon, disŝiris la ŝnurojn. 6 Pro
tio mortigos ilin leono el la arbaro, lupo el la stepo
ilin prirabos, leopardo atendos ilin apud iliaj urboj;
ĉiu, kiu eliros el tie, estos disŝirata. Ĉar multaj fariĝis
iliaj krimoj, fortaj fariĝis iliaj perfidoj. 7 Kiel Mi tion
pardonus al vi? viaj filoj Min forlasis kaj ĵuris per
ne-dioj. Mi ĵurigis ilin, sed ili adultas kaj iras amase
en malĉastejojn. 8 Ili fariĝis kiel voluptemaj pasiaj
ĉevaloj; ĉiu blekas al la edzino de sia proksimulo. 9 Ĉu
Mi povas ne puni pro tio? diras la Eternulo; kaj ĉu al
tia popolo Mia animo povas ne venĝi? 10 Iru sur ĝiajn
muregojn kaj detruu ilin, tamen ne tute ekstermu;
forigu ĝiajn branĉojn, ĉar ne por la Eternulo ili estas.
11 Ĉar forte perfidis Min la domo de Izrael kaj la domo
de Jehuda, diras la Eternulo. 12 Ili neis la ekzistadon
de la Eternulo, kaj diris: Li ne ekzistas, kaj ne venos
sur nin malbono, kaj glavon kaj malsaton ni ne vidos.
13 Kaj la profetoj estas kiel vento, ne troviĝas en
ili la vorto de Dio; tiel fariĝu al ili. 14 Pro tio tiele
diras la Eternulo, Dio Cebaot: Pro tio, ke vi parolas
tiajn vortojn, jen Mi metos Miajn vortojn en vian
buŝon kiel fajron, kaj ĉi tiu popolo estos kiel ligno,
kiun ĝi konsumos. 15 Jen Mi venigos sur vin, sur la
domon de Izrael, popolon de malproksime, diras la
Eternulo, popolon fortan, popolon antikvan, popolon,
kies lingvon vi ne scias; kaj vi ne komprenos, kion ĝi
parolas. 16 Ĝia sagujo estas kiel malfermita tombo;
ĉiuj ili estas herooj. 17 Ĝi formanĝos vian rikolton kaj
vian panon, ekstermos viajn filojn kaj viajn filinojn,
formanĝos viajn ŝafojn kaj viajn bovojn, formanĝos
viajn vinberojn kaj viajn figojn, detruos per glavo
viajn fortikigitajn urbojn, kiujn vi fidas. 18 Sed eĉ
en tiu tempo, diras la Eternulo, Mi ne pereigos vin
tute. 19 Kaj kiam oni demandos: Pro kio la Eternulo,
nia Dio, faras al ni ĉion ĉi tion? tiam diru al ili:
Kiel vi forlasis Min kaj servas al fremdaj dioj en via
lando, tiel vi servos al fremduloj en lando, kiu ne
apartenas al vi. 20 Anoncu tion en la domo de Jakob
kaj aŭdigu en Judujo, dirante: 21 Aŭskultu ĉi tion,
ho popolo malsaĝa kaj senkora, kiu havas okulojn,
sed ne vidas, havas orelojn, sed ne aŭdas. 22 Ĉu vi ne
timas Min? diras la Eternulo; ĉu vi ne tremas antaŭ
Mi, kiu faris sablon limo por la maro, aranĝo eterna,
kiun ĝi ne transpaŝas? kiom ajn ĝi skuiĝas, ĝi nenion
povas fari; kiom ajn bruas ĝiaj ondoj, ili ne povas ĝin
transpaŝi. 23 Sed ĉi tiu popolo havas koron defaleman
kaj neobeeman, ili defalis kaj foriris. 24 Kaj ili ne diris
en sia koro: Ni timu la Eternulon, nian Dion, kiu donas
al ni pluvon frusezonan kaj malfrusezonan en ĝia
tempo, kiu gardas por ni la semajnojn, destinitajn
por la rikolto. 25 Viaj malbonagoj tion forklinis,
kaj viaj pekoj forigis de vi la bonon. 26 Ĉar inter
Mia popolo troviĝas malvirtuloj, kiuj faras insidojn,
starigas pereigajn kaptilojn, kaptas la homojn. 27
Kiel birdejo estas plena de birdoj, tiel iliaj domoj
estas plenaj de trompakiraĵoj; tial ili fariĝis grandaj
kaj riĉaj. 28 Ili fariĝis grasaj, ili fariĝis dikaj; ili faris
malbonajn agojn; juĝon ili ne faras, juĝon pri orfo,
sed ili ĝuas la vivon; justecon al malriĉuloj ili ne faras.
29 Ĉu Mi povas lasi tion sen puno? diras la Eternulo;
ĉu al tia popolo Mia animo ne venĝos? 30 Io konsterna
kaj terura fariĝis en la lando: 31 la profetoj profetas
malveraĵon, kaj la pastroj regas per ili; kaj al mia
popolo tio plaĉas. Kaj kion vi faros en la estonteco?

6 Kuru rapide, ho filoj de Benjamen, el Jerusalem,
kaj en Tekoa sonigu la trumpeton kaj super Bet-
Kerem faru signalon; ĉar de nordo aperas malbono
kaj granda pereo. 2 Al bela kaj delikata virino Mi
similigis la filinon de Cion. 3 Al ŝi venos paŝtistoj

kun siaj brutaroj, ĉirkaŭ ŝi ili starigos tendojn, kaj
ĉiu paŝtos sur sia loko. 4 Aranĝu militon kontraŭ ŝi;
leviĝu, ni iru en tagmezo. Ho ve al ni! ĉar baldaŭ
vesperiĝos, etendiĝas la ombroj de vespero. 5 Leviĝu,
ni iru nokte, kaj ni detruu ŝiajn palacojn. 6 Ĉar tiele
diras la Eternulo Cebaot: Haku ŝiajn arbojn kaj aranĝu
remparon ĉirkaŭ Jerusalem; ĉi tiun urbon oni devas
puni, ĝi estas tute plena de malbonagoj. 7 Kiel fonto
elfluigas sian akvon, tiel ĝi elfluigas el si malbonon;
nur perforteco kaj rabado estas aŭdataj en ĝi, antaŭ
Mi estas ĉiam turmentado kaj batado. 8 Prudentiĝu,
ho Jerusalem, por ke ne foriĝu de vi Mia animo, por ke
Mi ne faru vin dezerto, lando ne loĝata. 9 Tiele diras
la Eternulo Cebaot: Oni kolektu la restaĵon de Izrael
kiel restaĵon de vinberoj; eltiru kaj retiru vian manon,
kiel ŝirkolektanto de vinberoj super la korboj. 10 Kun
kiu Mi parolu, kiun Mi admonu, ke oni Min aŭskultu?
ilia orelo ne estas cirkumcidita, kaj ili ne povas aŭdi.
Jen la vorton de la Eternulo ili malŝatas; ili ne deziras
ĝin. 11 Tial Mi pleniĝis de kolero de la Eternulo,
Mi ne plu povas toleri; elverŝu ĝin sur la infanojn
sur la strato kaj sur la interkonsiliĝon de la junuloj;
kiel viro, tiel ankaŭ virino estos kaptita, maljunulo
kaj profundaĝulo. 12 Iliaj domoj transiros al aliuloj,
ankaŭ la kampoj kaj la edzinoj; ĉar Mi etendos Mian
manon sur la loĝantojn de la lando, diras la Eternulo.
13 Ĉar ĉiuj, de la malgrandaj ĝis la grandaj, estas
profitavidaj; kaj de la profetoj ĝis la pastroj ĉiuj faras
malhonestaĵon. 14 Kaj la vundojn de Mia popolo ili
kuracas per facilanimigo, dirante, ke ĉio estas en bona
stato, kvankam ne estas bona stato. 15 Ĉu ili hontas,
ke ili faras abomenindaĵon? ili tute ne hontas, ili eĉ
ne povoscias ruĝiĝi; tial ili falos inter la falantoj, ili
renversiĝos, kiam Mi vizitos ilin, diras la Eternulo. 16
Tiele diras la Eternulo: Stariĝu sur la vojoj kaj rigardu,
kaj demandu pri la vojoj antikvaj, kia estas la bona
vojo, kaj iru laŭ ĝi kaj trovu ripozon por via animo.
Sed ili diris: Ni ne iros. 17 Kaj Mi starigis gardistojn
super vi, dirante: Atentu la sonadon de la trumpeto.
Sed ili diris: Ni ne atentos. 18 Tial aŭdu, ho popoloj,
kaj sciu, ho komunumoj, kio fariĝas ĉe ili. 19 Aŭskultu,
ho tero! jen Mi venigas malfeliĉon sur ĉi tiun popolon,
frukton de iliaj pensoj; ĉar ili ne atentis Miajn vortojn,
kaj Mian instruon ili forpuŝis. 20 Por kio Mi bezonas
la olibanon venantan el Ŝeba, kaj la bonodoran kanon
el malproksima lando? viaj bruloferoj ne plaĉas al Mi,
kaj viaj buĉoferoj ne estas agrablaj al Mi. 21 Tial tiele
diras la Eternulo: Jen Mi metos antaŭ ĉi tiu popolo
falpuŝilon, kaj sur ĝi falpuŝiĝos kune patroj kaj filoj,
najbaro kaj amiko pereos. 22 Tiele diras la Eternulo:
Jen venos popolo el norda lando, kaj granda nacio
leviĝos de la randoj de la tero. 23 Pafarkon kaj lancon
ili tenas forte; kruelaj ili estas kaj senkompataj; ilia
voĉo bruas kiel maro; sur ĉevaloj ili rajdas, armite
por la batalo kiel unu homo, kontraŭ vin, ho filino de
Cion. 24 Kiam ni aŭdis pri ili, malleviĝis niaj manoj,
teruro kaj doloro nin atakis kiel naskantinon. 25 Ne
eliru sur la kampon, ne iru sur la vojon, ĉar la glavo
de la malamiko vekas teruron ĉirkaŭe. 26 Ho filino de
Mia popolo! zonu vin per sakaĵo, rulu vin en cindro,
funebru kiel pro sola filo, ploru maldolĉe, ĉar subite
venos sur nin la pereiganto. 27 Kiel esploranton Mi
starigis vin inter Mia popolo, fortan, ke vi ekkonu
kaj esploru ilian vojon. 28 Ĉiuj ili estas obstinaj
defalintoj, kalumniantoj, kupro kaj fero; ĉiuj ili estas
degenerintoj. 29 La blovilo bruldifektiĝis, la plumbo
malaperis en la fajro; vane fandis la fandisto: la
malbonuloj ne apartiĝis. 30 Arĝento rifuzita oni nomos
ilin, ĉar la Eternulo forrifuzis ilin.

7 Jen estas la vorto, kiu aperis al Jeremia de la
Eternulo: 2 Stariĝu en la pordego de la domo
de la Eternulo, kaj tie proklamu ĉi tiun vorton, kaj
diru: Aŭskultu la vorton de la Eternulo, ĉiuj Judoj,
kiuj venas en ĉi tiun pordegon, por adorkliniĝi al
la Eternulo. 3 Tiele diras la Eternulo Cebaot, Dio de
Izrael: Plibonigu vian vojon kaj vian konduton; tiam
Mi loĝigos vin sur ĉi tiu loko. 4 Ne fidu la mensogajn
vortojn, kiam oni diras al vi: Ĉi tie estas la templo
de la Eternulo, la templo de la Eternulo, la templo
de la Eternulo. 5 Nur se vi plibonigos vian vojon kaj
vian konduton, se vi agos juste unu rilate la alian,
6 se vi ne premos fremdulon, orfon, kaj vidvinon,
se vi ne verŝos senkulpan sangon sur ĉi tiu loko,
kaj ne sekvos aliajn diojn por via malfeliĉo: 7 tiam
Mi loĝigos vin sur ĉi tiu loko, en la lando, kiun Mi
donis al viaj patroj, ĉiam kaj eterne. 8 Jen vi fidas la
mensogajn vortojn, kiuj neniom helpas. 9 Ŝtelante,
mortigante, adultante, ĵurante mensoge, incensante
al Baal, kaj sekvante aliajn diojn, kiujn vi ne konas, 10
vi poste venas kaj stariĝas antaŭ Mi en ĉi tiu domo,
kiu estas nomata per Mia nomo, kaj vi diras: Ni saviĝis
— kvankam vi plue faras ĉiujn tiujn abomenindaĵojn!
11 Ĉu ĉi tiun domon, kiu estas nomata per Mia nomo,

vi rigardas kiel neston de rabistoj? Mi bone vidas
tion, diras la Eternulo. 12 Iru do al Mia loko en Ŝilo,
kie Mi antaŭe loĝigis Mian nomon, kaj rigardu, kion
Mi faris al ĝi pro la malbonagoj de Mia popolo Izrael.
13 Kaj nun, ĉar vi faras ĉiujn tiujn farojn, diras la
Eternulo, kaj Mi de frua mateno ĉiam parolas al vi, kaj
vi ne aŭskultas, Mi vokas vin, kaj vi ne respondas: 14
tial al la domo, kiu estas nomata per Mia nomo kaj
kiun vi fidas, kaj al la loko, kiun Mi donis al vi kaj
al viaj patroj, Mi faros tiel, kiel Mi faris al Ŝilo. 15
Mi forpuŝos vin de antaŭ Mi, kiel Mi forpuŝis ĉiujn
viajn fratojn, la tutan idaron de Efraim. 16 Kaj vi ne
preĝu por ĉi tiu popolo kaj ne direktu por ili supren
krion kaj preĝon kaj ne klopodu antaŭ Mi, ĉar Mi ne
aŭskultos vin. 17 Ĉu vi ne vidas, kion ili faras en la
urboj de Judujo kaj sur la stratoj de Jerusalem? 18
La filoj kolektas la lignon, kaj la patroj ekbruligas la
fajron, kaj la virinoj knedas la paston, por fari kukojn
por la reĝino de la ĉielo, kaj ili faras verŝoferojn al
aliaj dioj, por ĉagreni Min. 19 Sed ĉu Min ili ĉagrenas?
diras la Eternulo; ĉu ne sin mem, por hontigi sian
vizaĝon? 20 Tial tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Jen
Mia kolero kaj indigno elverŝiĝos sur ĉi tiun lokon,
sur la homojn kaj sur la brutojn kaj sur la arbojn de la
kampo kaj sur la fruktojn de la tero; ĝi ekflamos kaj
ne estingiĝos. 21 Tiele diras la Eternulo Cebaot, Dio de
Izrael: Aldonu viajn bruloferojn al viaj buĉoferoj, kaj
manĝu la viandon; 22 ĉar Mi ne parolis al viaj patroj
kaj Mi ne ordonis al ili pri bruloferoj kaj buĉoferoj en
la tago, kiam Mi elkondukis ilin el la lando Egipta; 23
nur ĉi tion Mi ordonis al ili: Aŭskultu Mian voĉon, kaj
Mi estos via Dio, kaj vi estos Mia popolo, kaj iru laŭ
la tuta vojo, kiun Mi montros al vi, por ke estu al vi
bone. 24 Sed ili ne aŭskultis kaj ne alklinis sian orelon,
ili agis laŭ siaj propraj pensoj, laŭ la obstineco de sia
malbona koro, kaj ili iris malantaŭen, ne antaŭen.
25 De post la tago, kiam viaj patroj eliris el la lando
Egipta, ĝis la nuna tago Mi sendadis al vi ĉiujn Miajn
servantojn, la profetojn, ĉiutage Mi sendis; 26 sed
ili ne aŭskultis Min kaj ne alklinis sian orelon, ili
obstinigis sian nukon, agis pli malbone ol iliaj patroj.
27 Kaj kiam vi diros al ili ĉion ĉi tion, ili ne aŭskultos
vin; kiam vi vokos ilin, ili ne respondos al vi. 28 Diru
do al ili: Jen estas popolo, kiu ne aŭskultas la voĉon
de la Eternulo, sia Dio, kaj ne akceptas moralinstruon;
la kredo malaperis kaj estas ekstermita el ilia buŝo. 29
Detondu viajn harojn kaj forĵetu ilin, kantu funebran
kanton sur la altaĵoj; ĉar la Eternulo forrifuzis kaj
forpuŝis la generacion, kiun Li koleras. 30 Ĉar la filoj
de Jehuda faras malbonon antaŭ Miaj okuloj, diras la
Eternulo; siajn abomenindaĵojn ili metis en la domon,
kiu estas nomata per Mia nomo, por malpurigi ĝin. 31
Ili aranĝis altaĵojn de Tofet en la valo de la filo de
Hinom, por bruligi siajn filojn kaj siajn filinojn en
fajro, kion Mi ne ordonis kaj kio neniam estis en Miaj
pensoj. 32 Pro tio jen venos tempo, diras la Eternulo,
kiam oni jam nomos tion ne Tofet kaj valo de la filo
de Hinom, sed valo de mortigado, kaj en Tofet oni
enterigos mortintojn, ĉar mankos alia loko. 33 Kaj la
kadavroj de ĉi tiu popolo estos manĝaĵo por la birdoj
de la ĉielo kaj por la bestoj de la tero, kiujn neniu
fortimigos. 34 Kaj Mi ĉesigos en la urboj de Judujo kaj
sur la stratoj de Jerusalem la sonojn de ĝojo kaj la
sonojn de gajeco, la voĉon de fianĉo kaj la voĉon de
fianĉino; ĉar la lando fariĝos dezerto.

**8** En tiu tempo, diras la Eternulo, oni elĵetos el iliaj
tomboj la ostojn de la reĝoj de Judujo kaj la ostojn
de ĝiaj princoj kaj la ostojn de la pastroj kaj la ostojn
de la profetoj kaj la ostojn de la loĝantoj de Jerusalem;
2 kaj oni disĵetos ilin antaŭ la suno kaj antaŭ la luno
kaj antaŭ la tuta armeo de la ĉielo, kiujn ili amis, al
kiuj ili servis, kiujn ili sekvis, kiujn ili serĉis, kaj al kiuj
ili adorkliniĝis; oni ne kolektos ilin kaj ne enterigos
ilin, sed ili estos kiel sterko sur la supraĵo de la tero. 3
Kaj preferos la morton ol la vivon ĉiuj restintoj, kiuj
restos el tiu malbona gento, kiuj restos en ĉiuj lokoj,
sur kiujn Mi dispelis ilin, diras la Eternulo Cebaot.
4 Kaj diru al ili: Tiele diras la Eternulo: Ĉu se oni
falis, oni ne leviĝas? ĉu se oni devojiĝis, oni ne volas
reveni? 5 Kial do ĉi tiu popolo en Jerusalem defalis per
defalo obstina? ili forte sin tenas je la malveraĵo kaj
ne volas sin konverti. 6 Mi atentis kaj aŭskultis, sed ili
parolas nenion ĝustan; neniu pentas sian malbonecon,
dirante: Kion mi faris? Ĉiu fordonis sin al sia kurado,
kiel ĉevalo, kiu flugrapide kuras en la batalon. 7 Eĉ
cikonio sub la ĉielo scias sian tempon, turto, hirundo,
kaj gruo observas la tempon, kiam ili devas veni; sed
Mia popolo ne scias la leĝon de la Eternulo. 8 Kiel vi
diras: Ni estas saĝuloj, kaj ni havas antaŭ ni la instruon
de la Eternulo? Ĝi fariĝis ja mensogaĵo per la mensoga
skribilo de la skribistoj. 9 Per honto kovris sin la
saĝuloj, konfuziĝis kaj implikiĝis; jen ili forrifuzis
la vorton de la Eternulo, kian do saĝecon ili havas?

10 Tial Mi fordonos iliajn edzinojn al aliuloj, iliajn
kampojn al venkintoj; ĉar de malgrandulo ĝis grandulo
ili ĉiuj estas profitavidaj, de profeto ĝis pastro ili ĉiuj
faras malhonestaĵon. 11 Kaj la vundojn de la filino
de Mia popolo ili kuracas per facilanimigo, dirante,
ke ĉio estas en bona stato, kvankam ne estas bona
stato. 12 Ĉu ili hontas, ke ili faras abomenindaĵon? ili
tute ne hontas, ili eĉ ne povoscias ruĝiĝi; tial ili falos
inter la falantoj, ili renversiĝos, kiam Mi vizitos ilin,
diras la Eternulo. 13 Mi plene ŝirkolektos ilin, diras
la Eternulo; ne restos beroj sur la vinberbranĉo nek
figoj sur la figarbo, kaj la folioj forvelkos, kaj Mi donos
al ili plenan pereon. 14 Por kio ni sidas? kolektiĝu,
kaj ni iru en la fortikigitajn urbojn, kaj ni tie pereu;
ĉar la Eternulo, nia Dio, pereigas nin kaj trinkigas
al ni akvon maldolĉan pro tio, ke ni pekis antaŭ la
Eternulo. 15 Ni esperis pacon, sed venas nenio bona;
ni esperis tempon de resaniĝo, sed jen estas teruro.
16 El la regiono de Dan oni aŭdas spiregadon de iliaj
ĉevaloj; de la blekegado de iliaj fortaj ĉevaloj tremas
la tuta tero; ili iras, kaj ili formanĝos la teron, kaj tion,
kio estas sur ĝi, la urbon kaj ĝiajn loĝantojn. 17 Ĉar
jen Mi sendos sur vin serpentojn, vipurojn, kiujn oni
ne povas sorĉligi, kaj ili pikos vin, diras la Eternulo. 18
Mia malĝojo estas super ĉiuj malĝojoj, mia koro en mi
doloras. 19 Jen mi aŭdas kriadon de la filino de mia
popolo el lando malproksima: Ĉu jam ne ekzistas la
Eternulo en Cion? ĉu ĝia Reĝo ne estas en ĝi? Sed kial
ili kolerigis min per siaj idoloj, per fremdaj vantaĵoj?
20 Pasis la rikolto, finiĝis la somero, sed ni ne ricevis
helpon. 21 La malfeliĉo de mia popolo min afliktas,
mi malĝojas, mi sentas teruron. 22 Ĉu ne ekzistas
balzamo en Gilead? ĉu ne ekzistas tie kuracisto? kial
do ne venas resaniĝo al la filino de mia popolo?

**9** Ho, se mia kapo havus sufiĉe da akvo kaj miaj
okuloj estus fonto da larmoj! tage kaj nokte mi
priplorus la mortigitojn el mia popolo. 2 Ho, se mi
havus en la dezerto rifuĝejon por migrantoj! tiam mi
forlasus mian popolon kaj forirus de ili, ĉar ili ĉiuj
estas adultuloj, amaso da perfiduloj. 3 Per siaj langoj
ili pafas mensogon kiel per pafarko, ne por vero ili
fortiĝas sur la tero; ili iras de malbonago al malbonago,
kaj Min ili ne konas, diras la Eternulo. 4 Gardu vin
unu kontraŭ alia, kaj fidu neniun fraton; ĉar ĉiu frato
insidas, kaj ĉiu proksimulo disportas kalumniojn.
5 Unu trompas alian, kaj veron ili ne parolas; ili
lernigis sian langon paroli malveron, ili laciĝas de
malbonagado. 6 Vi loĝas meze de malhonesteco; pro
malhonesteco ili ne volas koni Min, diras la Eternulo.
7 Tial tiele diras la Eternulo Cebaot: Jen Mi fandos
kaj elprovos ilin; ĉar kiel alie Mi povas agi kun la
filino de Mia popolo? 8 Ilia lango estas vundanta
sago, ĝi parolas trompe; per sia buŝo ili afable salutas
sian proksimulon, sed en sia koro ili faras insidon
kontraŭ li. 9 Ĉu pro tio Mi povas ne puni ilin? diras la
Eternulo; ĉu al tia popolo Mia animo ne venĝos? 10 Pri
la montoj Mi ploros, kaj pri la kabanoj en la dezerto
Mi kantos funebre; ĉar ili estas tiel bruligitaj, ke jam
neniu migranto en ilin eniras, kaj oni jam ne aŭdas
blekadon de brutoj; de la birdoj de la ĉielo ĝis la brutoj
ĉio diskuris, foriris. 11 Mi faros Jerusalemon amaso da
ŝtonoj, loĝejo de ŝakaloj; kaj la urbojn de Judujo Mi
dezertigos tiel, ke estos en ili neniu loĝanto. 12 Ĉu
ekzistas homo saĝa, kiu komprenus tion kaj klarigus
tion, kion diras al li la buŝo de la Eternulo, pro kio la
lando pereis kaj estas bruldetruita kiel dezerto tiel, ke
neniu iras tra ĝi? 13 Kaj la Eternulo diris: Pro tio, ke
ili forlasis Mian instruon, kiun Mi donis al ili, kaj ne
aŭskultis Mian voĉon kaj ne sekvis ĝin, 14 sed sekvis
la obstinecon de sia koro kaj la Baalojn, kiel lernigis al
ili iliaj patroj: 15 tial tiele diras la Eternulo Cebaot, Dio
de Izrael: Jen Mi manĝigos al tiu popolo vermuton kaj
trinkigos al ili akvon maldolĉan; 16 kaj Mi dissemos
ilin inter popoloj, kiujn ne konis ili nek iliaj patroj;
kaj Mi sendos post ilin glavon, ĝis Mi tute ekstermos
ilin. 17 Tiele diras la Eternulo Cebaot: Serĉu kaj voku
ploristinojn, ke ili venu; sendu voki lertulinojn en tia
afero, ke ili venu. 18 Ili rapidu kaj komencu funebran
ploradon pri ni, por ke el niaj okuloj ekfluu larmoj
kaj de niaj palpebroj ekverŝiĝu akvo. 19 Voĉo de
funebra plorado estos aŭdata el Cion: Kiele ni estas
ruinigitaj! kiele ni estas kovritaj de honto! ĉar ni
forlasis nian landon kaj estas elĵetitaj el niaj loĝejoj.
20 Aŭskultu do, ho virinoj, la vorton de la Eternulo,
kaj via orelo enprenu la vorton el Lia buŝo: Lernigu al
viaj filinoj funebran ploradon kaj unu al alia funebran
kantadon. 21 Ĉar la morto eniras en niajn fenestrojn
kaj venas en niajn palacojn, por ekstermi infanojn de
ekstere, junulojn de la stratoj. 22 Diru, ke tiele diras
la Eternulo: La kadavroj de homoj falos kiel sterko
sur la kampojn kaj kiel garboj malantaŭ la rikoltanto,
kaj neniu ilin enkolektos. 23 Tiele diras la Eternulo:
Ne fieru saĝulo pri sia saĝeco, ne fieru fortulo pri sia

forteco, ne fieru riĉulo pri sia riĉeco; 24 sed kiu volas
fieri, tiu fieru nur pri tio, ke li komprenas kaj konas
Min, ke Mi estas la Eternulo, kiu faras korfavoraĵon,
juĝon, kaj justaĵon sur la tero; ĉar ĉi tio plaĉas al
Mi, diras la Eternulo. 25 Jen venos tagoj, diras la
Eternulo, kiam Mi punvizitos ĉiujn cirkumciditajn kaj
necirkumciditajn, 26 Egiptujon, Judujon, Edomon, la
Amonidojn, Moabon, kaj ĉiujn, kiuj tondas la harojn
sur la tempioj kaj kiuj loĝas en la dezerto; ĉar ĉiuj
popoloj havas necirkumciditan prepucion, sed la tuta
domo de Izrael havas necirkumciditan koron.

10 Aŭskultu la vorton, kiun diras pri vi la Eternulo,
ho domo de Izrael! 2 Tiele diras la Eternulo: Ne
lernu la konduton de la nacioj, kaj ne timu la signojn
de la ĉielo, kiel la nacioj ilin timas. 3 Ĉar la aranĝoj
de la nacioj estas vantaĵo: ili dehakas arbon en la
arbaro, kaj ĉarpentisto prilaboras ĝin per hakilo; 4
ili ornamas ĝin per arĝento kaj oro, fortikigas per
najloj kaj marteloj, por ke ĝi ne disfalu. 5 Ili estas kiel
kolono ĉirkaŭforĝita; ili ne parolas, oni portas ilin, ĉar
ili ne povas iri. Ne timu ilin, ĉar ili ne faras malbonon,
tiel same, kiel ili ne povas fari bonon. 6 Sed simila al
Vi, ho Eternulo, ekzistas neniu; granda Vi estas, kaj
granda estas Via nomo en potenco. 7 Kiu povas ne
timi Vin, ho Reĝo de la popoloj? al Vi tio decas, ĉar
inter ĉiuj saĝuloj de la nacioj kaj en ĉiuj iliaj regnoj
ekzistas neniu simila al Vi. 8 Ĉiuj ili malsaĝiĝis kaj
idiotiĝis, ĉar ligno donas ja nur vantaĵan instruon. 9
Foliigita arĝento estas venigita el Taŝiŝ kaj oro el Ufaz,
laboritaĵo de artisto kaj de la manoj de fandisto; blua
kaj purpura ŝtofo estas ilia vesto, ĉio estas faritaĵo de
lertuloj. 10 Sed la Eternulo estas Dio vera, Li estas
Dio vivanta kaj Reĝo eterna; de Lia kolero tremas
la tero, kaj la nacioj ne povas elteni Lian indignon.
11 Diru do al ili: La dioj, kiuj ne kreis la ĉielon kaj
la teron, pereos de sur la tero kaj sub la ĉielo. 12 Li
kreis la teron per Sia forto, aranĝis la mondon per
Sia saĝo, kaj per Sia prudento etendis la ĉielon. 13
Kiam Li eksonigas Sian voĉon, kolektiĝas multego da
akvo en la ĉielo; Li levas la nubojn de la randoj de la
tero, Li aperigas fulmojn inter la pluvo, kaj eligas
la venton el Siaj trezorejoj. 14 Malsaĝiĝis ĉiu homo
kun sia sciado, per honto kovriĝis ĉiu fandisto kun sia
statuo; ĉar lia fanditaĵo estas malveraĵo, ĝi ne havas
en si spiriton. 15 Tio estas vantaĵo, faro de eraro;
kiam ili estos vizititaj, ili pereos. 16 Ne simila al ili
estas Tiu, kiun havas Jakob; ĉar Li estas la kreinto de
ĉio, kaj Izrael estas la gento de Lia heredo; Eternulo
Cebaot estas Lia nomo. 17 Forprenu de la tero vian
komercaĵon, vi, kiu loĝas en fortikaĵo; 18 ĉar tiele diras
la Eternulo: Jen Mi ĉi tiun fojon elĵetos la loĝantojn de
la lando, kaj Mi premos ilin, ke ili sentos kaj diros: 19
Ho ve al mi en mia malfeliĉo! neresanigebla estas mia
vundo. Kaj mi pensis, ke tio estas mia malsano, kiun
mi devas elporti. 20 Mia tendo estas ruinigita, kaj ĉiuj
miaj ŝnuroj estas disŝiritaj; miaj infanoj foriris de mi
kaj forestas; estas jam neniu, kiu povus starigi mian
tendon kaj pendigi miajn kurtenojn. 21 Ĉar la paŝtistoj
malsaĝiĝis kaj ne serĉis la Eternulon; tial ili nenion
komprenas kaj ilia tuta paŝtataro estas dispelita. 22
Jen venas laŭta krio kaj granda bruo el norda lando,
por fari la urbojn de Judujo ruinoj, loĝejo de ŝakaloj.
23 Mi scias, ho Eternulo, ke la vojo de homo estas ne
laŭ lia volo, ke homo iranta ne povas libere direkti
siajn paŝojn. 24 Punu min, ho Eternulo, sed laŭjuĝe,
ne en Via kolero, por ke Vi min ne tro dispremu. 25
Elverŝu Vian koleron sur tiujn naciojn, kiuj Vin ne
konas, kaj sur la gentojn, kiuj ne vokas Vian nomon;
ĉar ili formanĝis Jakobon, englutis lin, ekstermis lin,
kaj dezertigis lian loĝejon.

11 Jen estas la vorto, kiu aperis al Jeremia de la
Eternulo: 2 Aŭskultu la vortojn de ĉi tiu interligo,
kaj raportu ilin al la Judoj kaj al la loĝantoj de
Jerusalem. 3 Kaj diru al ili: Tiele diras la Eternulo, Dio
de Izrael: Malbenita estu la homo, kiu ne aŭskultos
la vortojn de ĉi tiu interligo, 4 kiun Mi donis al viaj
patroj, kiam Mi elkondukis ilin el la lando Egipta,
el la fera forno, dirante: Obeu Mian voĉon, kaj faru
ĉion, kion Mi ordonas al vi; kaj vi estos Mia popolo,
kaj Mi estos via Dio; 5 por ke plenumiĝu la ĵuro,
kiun Mi ĵuris al viaj patroj, ke Mi donos al ili landon,
kie fluas lakto kaj mielo, kiel tio estas nun. Kaj mi
respondis kaj diris: Tiel estu, ho Eternulo. 6 Kaj la
Eternulo diris al mi: Proklamu ĉiujn ĉi tiujn vortojn
en la urboj de Judujo kaj sur la stratoj de Jerusalem,
dirante: Aŭskultu la vortojn de ĉi tiu interligo kaj
plenumu ilin. 7 Ĉar Mi klare avertis viajn patrojn,
kiam Mi elkondukis ilin el la lando Egipta, ĝis la nuna
tago, Mi konstante avertadis ilin, dirante: Aŭskultu
Mian voĉon. 8 Sed ili ne aŭskultis kaj ne alklinis sian
orelon, ĉiu sekvis la obstinecon de sia malbona koro;
kaj tial Mi venigis sur ilin ĉion, kio estas dirita en

ĉi tiu interligo, kiun Mi ordonis plenumi, sed kiun
ili ne plenumis. 9 Kaj la Eternulo diris al mi: Fariĝis
ribelo ĉe la Judoj kaj ĉe la loĝantoj de Jerusalem; 10 ili
returnis sin al la malbonagoj de siaj prapatroj, kiuj
ne volis obei Miajn vortojn kaj sekvis aliajn diojn,
servante al ili; la domo de Izrael kaj la domo de Jehuda
rompis Mian interligon, kiun Mi faris kun iliaj patroj.
11 Tial tiele diras la Eternulo: Jen Mi venigos sur ilin
malfeliĉon, el kiu ili ne povos liberiĝi; kaj ili krios
al Mi, sed Mi ne aŭskultos ilin. 12 Tiam la urboj de
Judujo kaj la loĝantoj de Jerusalem iros kaj krios al
tiuj dioj, al kiuj ili incensas, sed tiuj ne helpos ilin en
la tempo de ilia malfeliĉo. 13 Ĉar kiom da urboj, tiom
da dioj vi havas, ho Jehuda; kaj kiom da stratoj estas
en Jerusalem, tiom da hontindaj altaroj vi starigis, por
incensi al Baal. 14 Kaj vi ne preĝu por ĉi tiu popolo kaj
ne direktu por ili supren peton kaj preĝon; ĉar Mi
ne aŭskultos, kiam ili vokos al Mi en la tempo de sia
malfeliĉo. 15 Por kio, Mia kara, vi faras en Mia domo
la multajn artifikojn kaj alportas la sanktan viandon,
se vi fariĝas ĉiam pli malbona kaj ankoraŭ ĝojas pri
tio? 16 La Eternulo nomis vin verda, bela, fruktoriĉa
olivarbo; sed kun granda bruo ekbruligis ĝin fajro,
kaj ĝiaj branĉoj difektiĝis. 17 La Eternulo Cebaot, kiu
plantis vin, dekretis por vi malbonon pro la malbono
de la domo de Izrael kaj de la domo de Jehuda, kiun
ili faris, kolerigante Min per la incensado al Baal. 18
Vi, ho Eternulo, sciigis tion al mi, por ke mi sciu; Vi
montris al mi iliajn farojn. 19 Kaj mi, kiel milda ŝafido,
kondukata al la buĉo, ne sciis, ke ili havas malbonajn
intencojn kontraŭ mi, dirante: Ni ekstermu la arbon
kun ĝiaj fruktoj, ni elhaku ĝin el la tero de la vivo,
por ke lia nomo ne plu estu rememorata. 20 Sed
Vi, ho Eternulo Cebaot, kiu juĝas juste, kiu esploras
la internon kaj la koron, vidigu al mi Vian venĝon
kontraŭ ili, ĉar al Vi mi transdonis mian proceson. 21
Tial tiele diras la Eternulo pri la loĝantoj de Anatot,
kiuj serĉas vian animon, kaj diras: Ne profetu al ni
en la nomo de la Eternulo, por ke vi ne mortu de
niaj manoj; 22 tiele diras la Eternulo Cebaot: Jen Mi
punvizitos ilin; la junuloj mortos de glavo, iliaj filoj
kaj filinoj mortos de malsato. 23 Kaj neniu restos el ili,
ĉar Mi venigos malfeliĉon sur la loĝantojn de Anatot
en la jaro, kiam Mi punvizitos ilin.

**12** Vi estos prava, ho Eternulo, kiam mi procesos
kun Vi; tamen mi parolos kun Vi pri justeco: kial
la vojo de malpiuloj estas sukcesa kaj ĉiuj perfiduloj
vivas trankvile? 2 Vi plantis ilin, kaj ili ricevis fortajn
radikojn, ili kreskas kaj donas fruktojn; proksima Vi
estas en ilia buŝo, sed malproksima de ilia interno. 3
Sed min, ho Eternulo, Vi konas; Vi vidis kaj esploris,
kia estas mia koro koncerne Vin. Pelu ilin, kiel ŝafojn
al la buĉo, kaj apartigu ilin por la tago de mortigo. 4
Kiel longe Vi tenos la landon en malĝojo kaj la herbo
sur ĉiuj kampoj velkos? Brutoj kaj birdoj pereas pro
la malboneco de ĝiaj loĝantoj, kiuj diras: Li ne scias,
kio estos al ni. 5 Se vi kuras kun piedirantoj kaj ili
vin lacigas, kiel do vi povas konkuri kun ĉevaloj? se
vi esperas trovi sendanĝerecon en lando paca, kion
vi faros ĉe la majesta Jordan? 6 Ĉar eĉ viaj fratoj
kaj la domo de via patro agas perfide kontraŭ vi,
krias post vi plenvoĉe. Ne fidu ilin, eĉ se ili parolos
al vi bone. 7 Mi forlasis Mian domon, Mi foriris de
Mia heredaĵo; tion, kio estis kara por Mia animo,
Mi fordonis en la manojn de ĝiaj malamikoj. 8 Mia
heredaĵo fariĝis por Mi kiel leono en la arbaro: ĝi
ekblekegis kontraŭ Mi, tial Mi ĝin ekmalamis. 9 Mia
heredaĵo fariĝis kiel diverskolora rabobirdo, kiun
ĉirkaŭe atakis aliaj rabobirdoj. Venu, kolektiĝu, ĉiuj
bestoj de la kampo, venu, por formanĝi ĝin. 10 Multo
da paŝtistoj ruinigis Mian vinberĝardenon, dispremis
per la piedoj Mian kampoparton, Mian plej amatan
kampoparton ili faris senfrukta dezerto. 11 Ili faris ĝin
dezerto, kaj ĝia dezerteco plendas antaŭ Mi; la tuta
lando estas dezertigita, kaj neniu zorgas pri tio. 12
Sur ĉiujn altaĵojn en la dezerto venis ruinigantoj, ĉar
la glavo de la Eternulo ekstermas ĉion de unu rando
de la lando ĝis la alia; neniu karno estas indulgata. 13
Ili semis tritikon, sed rikoltis dornojn; ili elspezis, sed
ne profitis; viaj enspezoj estos hontindaj, pro la flama
kolero de la Eternulo. 14 Tiele diras la Eternulo pri ĉiuj
malbonaj najbaroj, kiuj tuŝis la posedaĵon, kiun Mi
heredigis al Mia popolo Izrael: Jen Mi elŝiros ilin el ilia
lando, kaj la domon de Jehuda Mi eltiros el inter ili. 15
Kaj kiam Mi estos elŝirinta ilin, Mi denove kompatos
ilin kaj revenigos ĉiun al lia heredaĵo kaj ĉiun en lian
landon. 16 Kaj se ili lernos la agmanieron de Mia
popolo, por ĵuri per Mia nomo: Kiel vivas la Eternulo,
simile al tio, kiel ili lernigis al Mia popolo ĵuri per Baal,
tiam ili estos konstrue aranĝitaj inter Mia popolo.
17 Sed se ili ne aŭskultos, tiam Mi tute elŝiros tiun
popolon kaj ekstermos ĝin, diras la Eternulo.

**13** Tiele diris al mi la Eternulo: Iru, aĉetu al vi tolan
zonon kaj metu ĝin sur viajn lumbojn, sed en
akvon ĝin ne metu. **2** Kaj mi aĉetis la zonon konforme
al la vorto de la Eternulo kaj metis ĝin sur miajn
lumbojn. **3** Kaj duafoje aperis al mi la vorto de la
Eternulo, dirante: **4** Prenu la zonon, kiun vi aĉetis,
kiu estas sur viaj lumboj, leviĝu kaj iru al Eŭfrato,
kaj kaŝu ĝin tie en fendo de roko. **5** Kaj mi iris kaj
kaŝis ĝin apud Eŭfrato, kiel la Eternulo al mi ordonis.
**6** Post longa tempo la Eternulo diris al mi: Leviĝu,
iru al Eŭfrato, kaj prenu de tie la zonon, pri kiu Mi
ordonis al vi, ke vi kaŝu ĝin tie. **7** Kaj mi iris al Eŭfrato,
elfosis kaj prenis la zonon el la loko, kie mi ĝin kaŝis;
kaj jen montriĝis, ke la zono tute putriĝis kaj jam
por nenio taŭgas. **8** Kaj aperis al mi la vorto de la
Eternulo, dirante: **9** Tiele diras la Eternulo: Tiele Mi
putrigos la fieron de Jehuda kaj la grandan fieron de
Jerusalem. **10** Tiu malbona popolo, kiu ne volas obei
Miajn vortojn, kiu sekvas la obstinecon de sia koro, kaj
sekvas aliajn diojn, servante al ili kaj adorkliniĝante al
ili, fariĝos kiel ĉi tiu zono, kiu jam taŭgas por nenio.
**11** Kiel zono estas alligata al la lumboj de homo, tiel
Mi alligis al Mi la tutan domon de Izrael kaj la tutan
domon de Jehuda, diras la Eternulo, por ke ili estu Mia
popolo, Mia nomo, gloro, kaj ornamo; sed ili ne obeis.
**12** Kaj diru al ili ĉi tion: Tiele diras la Eternulo, Dio de
Izrael: Ĉiu vinkruĉo estos plenigata de vino. Ili diros
al vi: Ĉu ni ne scias, ke ĉiu vinkruĉo estos plenigata de
vino? **13** Sed vi diru al ili: Tiele diras la Eternulo: Jen
Mi plenigos ĝis ebrieco ĉiujn loĝantojn de ĉi tiu lando,
la reĝojn, kiuj sidas sur la trono de David, la pastrojn,
la profetojn, kaj ĉiujn loĝantojn de Jerusalem; **14**
kaj Mi interfrapigos ilin reciproke, la patrojn kaj la
filojn kune, diras la Eternulo, Mi ne kompatos, ne
preterlasos, ne indulgos, ekstermante ilin. **15** Aŭskultu
kaj atentu; ne tenu vin alte, ĉar la Eternulo parolas.
**16** Donu honoron al la Eternulo, via Dio, antaŭ ol Li
venigos mallumon, kaj antaŭ ol viaj piedoj falpuŝiĝos
sur la mallumaj montoj; tiam vi atendos lumon, sed Li
donos anstataŭ ĝi ombron de morto, densan nebulon.
**17** Se vi ne aŭskultos, tiam mia animo kaŝe ploros pro
via fiero, ĝi ploros maldolĉe, kaj el miaj okuloj fluegos
larmoj, ĉar kaptita estos la paŝtataro de la Eternulo.
**18** Diru al la reĝo kaj al la reĝino: Sidiĝu pli malalte,
ĉar la krono de via majesto defalis de via kapo. **19** La
sudaj urboj estas fermitaj, kaj neniu ilin malfermos; la
tuta Judujo estas forkondukita en kaptitecon, ĝi tuta
estas forkondukita. **20** Levu viajn okulojn, kaj rigardu
tiujn, kiuj venas de nordo. Kie estas la paŝtataro,
kiu estas komisiita al vi, via bela ŝafaro? **21** Kion vi
diros, kiam Li punvizitos vin? vi lernigis ja ilin esti
kontraŭ vi, esti ĉefoj kaj ordonantoj. Ĉu ne atakos vin
doloroj kiel naskantan virinon? **22** Eble vi diros en via
koro: Pro kio trafis min ĉi tio? Pro la multo de viaj
malbonagoj estas levitaj la randoj de viaj vestoj kaj
malhonoritaj viaj kalkanoj. **23** Ĉu negro povas ŝanĝi
sian haŭton aŭ leopardo siajn makulojn? tiel ankaŭ vi,
ĉu vi povas fari bonon, alkutimiĝinte al malbono? **24**
Tial Mi disblovos ilin kiel pajlopecetojn, kiujn dispelas
la vento el la dezerto. **25** Tio estos via sorto, via
parto, destinita de Mi, diras la Eternulo, pro tio, ke vi
forgesis Min kaj fidis malveraĵon. **26** Kaj Mi levos la
randojn de viaj vestoj ĝis via vizaĝo, kaj montriĝos
via hontindaĵo, **27** via adulto, via voluptegeco, viaj
malĉastaj pensoj. Sur la montetoj de la kampo Mi
vidis viajn abomenindaĵojn. Ve al vi, ho Jerusalem! ĉu
vi ne puriĝos? kiam do fine?

**14** Vorto de la Eternulo, kiu aperis al Jeremia
koncerne la senpluvecon. **2** Judujo funebras, ĝiaj
pordegoj malĝoje nigriĝis, klinite al la tero, kaj plora
kriado leviĝas el Jerusalem. **3** Ĝiaj potenculoj sendas
siajn subulojn, por alporti akvon; ĉi tiuj venas al la
putoj, sed ne trovas akvon; ili alportas returne siajn
vazojn malplenajn, ili hontas, konsterniĝas, kaj kovras
sian kapon. **4** Ĉar la tero dezertiĝis pro tio, ke ne estis
pluvo, tial konsterniĝis la terkultivistoj kaj kovris
sian kapon. **5** Eĉ cervino, naskinta sur la kampo,
forlasas sian idon, ĉar ne ekzistas verdaĵo. **6** Sovaĝaj
azenoj staras sur montetoj, glutas aeron kiel ŝakaloj;
senbriliĝis iliaj okuloj, ĉar ne ekzistas herbo. **7** Se niaj
malbonagoj akuzas nin, ho Eternulo, tiam agu pro Via
nomo; ĉar granda estas nia perfido, ni pekis antaŭ
Vi. **8** Ho espero de Izrael kaj lia savanto en tempo
de malfeliĉo! kial Vi estas kiel fremdulo en la lando,
kiel pasanto, kiu eniris nur por tradormi la nokton?
**9** Kial Vi estas kiel homo konfuzita, kiel fortulo, kiu
ne povas helpi? Vi estas ja meze de ni, ho Eternulo,
kaj ni portas sur ni Vian nomon; ne forlasu nin. **10**
Tiele diras la Eternulo pri ĉi tiu popolo: Ili amas vagi,
ili ne retenas siajn piedojn; tial la Eternulo ne estas
favora al ili, nun Li memoras iliajn malbonagojn kaj
punas iliajn pekojn. **11** Kaj la Eternulo diris al mi:
Ne preĝu por ĉi tiu popolo, por ĝia bono. **12** Se ili

fastos, Mi ne aŭskultos ilian preĝon, kaj se ili alportos
bruloferojn kaj farunoferojn, Mi ne estos favora al
ili; sed Mi ekstermos ilin per glavo, per malsato, kaj
per pesto. 13 Tiam mi diris: Ho Sinjoro, ho Eternulo!
jen la profetoj diras al ili: Vi ne vidos glavon, kaj
malsato ne estos ĉe vi, ĉar veran pacon Mi donos
al vi sur ĉi tiu loko. 14 Sed la Eternulo diris al mi:
Malveraĵon profetas tiuj profetoj en Mia nomo; Mi
ne sendis ilin, ne donis al ili ordonojn, kaj ne parolis
al ili; ili profetas al vi viziojn mensogajn, sorĉaĵon,
idolaĵon, kaj trompaĵon de sia koro. 15 Tial tiele diras
la Eternulo pri la profetoj: Ĉar ili profetas en Mia
nomo, kvankam Mi ne sendis ilin, kaj ili diras, ke
glavo kaj malsato ne estos en ĉi tiu lando — per
glavo kaj malsato estos ekstermitaj tiuj profetoj; 16
kaj la popolo, al kiu ili profetas, estos disĵetita sur
la stratojn de Jerusalem per malsato kaj glavo, kaj
neniu ilin enterigos — ili, iliaj edzinoj, iliaj filoj, kaj
iliaj filinoj; kaj Mi elverŝos sur ilin ilian malbonecon.
17 Kaj diru al ili jenon: Miaj okuloj fluigas larmojn
nokte kaj tage kaj ne ĉesas, ĉar granda malfeliĉo
trafis la virgulinon, la filinon de mia popolo, frapo tre
doloriga. 18 Kiam mi eliras sur la kampon, mi vidas
homojn, mortigitajn per glavo; kiam mi eniras en la
urbon, mi vidas homojn, senfortigitajn de malsato;
ankaŭ la profetoj kaj pastroj formigris en landon,
kiun ili ne konas. 19 Ĉu Vi tute forpuŝis Jehudan? ĉu
Via animo eksentis abomenon kontraŭ Cion? kial Vi
frapis nin tiel, ke neniu povas nin resanigi? Ni esperis
pacon, sed venis nenio bona; ni esperis tempon de
resaniĝo, sed ni havas nur teruron. 20 Ni konfesas,
ho Eternulo, nian malpiecon kaj la malbonagojn de
niaj patroj; ĉar ni pekis antaŭ Vi. 21 Pro Via nomo ne
malestimegu nin, ne malaltigu la tronon de Via gloro;
memoru kaj ne rompu Vian interligon kun ni. 22 Ĉu
inter la idoloj de la nacioj ekzistas tiaj, kiuj povas doni
pluvon? ĉu la ĉielo per si mem donas pluvegon? Vi
estas ja la Eternulo, nia Dio, kaj ni esperas al Vi, ĉar
Vi faras ĉion ĉi tion.

15 Kaj la Eternulo diris al mi: Eĉ se stariĝus antaŭ
Mi Moseo kaj Samuel, eĉ tiam Mia animo ne
estos kun tiu popolo; forpelu ilin de antaŭ Mia vizaĝo,
ili foriru. 2 Kaj se ili diros al vi: Kien ni iru? tiam diru
al ili, ke tiele diras la Eternulo: Kiu estas destinita
por la morto, tiu iru al la morto; kiu estas destinita
por la glavo, tiu iru al la glavo; kiu estas destinita por
la malsato, tiu iru al la malsato; kiu estas destinita
por kaptiteco, tiu iru en kaptitecon. 3 Mi punos
ilin per kvar specoj, diras la Eternulo: per glavo,
por mortigi; per hundoj, por treni; per birdoj de
la ĉielo kaj per bestoj de la tero, por formanĝi kaj
ekstermi. 4 Mi faros ilin objekto de teruro por ĉiuj
regnoj de la tero, pro Manase, filo de Ĥizkija, reĝo
de Judujo, pro tio, kion li faris en Jerusalem. 5 Ĉar
kiu kompatos vin, ho Jerusalem, kaj kiu afliktiĝos pri
vi? kiu sin turnos, por demandi pri via farto? 6 Vi
forlasis Min, diras la Eternulo, vi iris malantaŭen; tial
Mi etendas Mian manon sur vin kaj pereigas vin; Mi
laciĝis de kompatado. 7 Mi disŝutis ilin per ŝutilo tra
la pordegojn de la lando, Mi seninfanigis kaj pereigis
Mian popolon; kaj tamen ili ne returnis sin de sia
vojo. 8 Mi faros, ke da vidvinoj ĉe ili estos pli ol da
sablo ĉe la maro; en ilian ĉefurbon Mi venigos junan
militiston, kiu ruinigas meze de la tago; Mi ĵetos sur
ĝin subite timon kaj teruron. 9 Naskintino de sep
infanoj estas senforta, eliras ŝia animo; subiras ŝia
suno, kiam estas ankoraŭ tago; ŝi estas kovrita de
honto kaj de malhonoro. Kaj tiujn, kiuj restis, Mi
transdonos al glavo antaŭ iliaj malamikoj, diras la
Eternulo. 10 Ho ve al vi, mia patrino, ke vi naskis min
kiel homon, kontraŭ kiu ĉiu malpacas kaj kiun ĉiu
atakas sur la tuta tero! Mi ne pruntedonis procentege,
mi ne prenis prunte; tamen ĉiuj min malbenas. 11 La
Eternulo diris: Mi liberigos vin por bono, Mi helpos
vin en la tempo malbona kaj en la tempo de premado
kontraŭ la malamiko. 12 Ĉu oni rompas feron per
fero el nordo kaj per kupro? 13 Vian riĉaĵon kaj viajn
trezorojn Mi fordonos al rabado, sen ia pago, pro ĉiuj
viaj pekoj en ĉiuj viaj limoj. 14 Kaj Mi transirigos vin al
viaj malamikoj en landon, kiun vi ne konas; ĉar fajro,
kiu ekflamis en Mia kolero, brulos sur vi. 15 Vi scias,
ho Eternulo; rememoru min, kaj vizitu min, kaj venĝu
pro mi al miaj persekutantoj; pro Via toleremeco ne
pereigu min; sciu, ke pro Vi mi suferas malhonoron.
16 Kiam mi trovis Viajn vortojn, mi ilin englutis; kaj
Via vorto fariĝis mia ĝojo kaj gajeco de mia koro;
ĉar mi portas sur mi Vian nomon, ho Eternulo, Dio
Cebaot. 17 Mi ne sidis en interkonsiliĝo de mokantoj
kaj ne ĝojis kun ili; mi sidis solece antaŭ Via mano,
ĉar Vi plenigis min per indigno. 18 Kial mia malsano
estas senfina, kaj mia vundo tiel malfacila, ke ĝi ne
povas resaniĝi? Vi fariĝis por mi kiel malaperanta
fonto de akvo nefidebla. 19 Tial tiele diras la Eternulo:

Se vi revenos, tiam Mi denove starigos vin antaŭ Mi;
se el senvaloraĵo vi eltiros la valoraĵon, vi fariĝos kiel
Mia buŝo; ili revenos al vi, sed vi ne revenos al ili.
20 Kaj Mi starigos vin por tiu popolo kiel fortikan
kupran muron; ili batalos kontraŭ vi, sed ne venkos
vin; ĉar Mi estas kun vi, por vin helpi kaj savi, diras la
Eternulo. 21 Mi savos vin el la mano de malbonuloj,
kaj Mi liberigos vin el la mano de tiranoj.

16 Kaj aperis al mi la vorto de la Eternulo, dirante:
2 Ne prenu al vi edzinon, kaj ne havu filojn nek
filinojn, sur ĉi tiu loko. 3 Ĉar tiele diras la Eternulo
pri la filoj kaj filinoj, kiuj naskiĝas sur ĉi tiu loko,
pri iliaj patrinoj, kiuj naskas ilin, kaj pri iliaj patroj,
kiuj naskigas ilin en ĉi tiu lando: 4 Per diversaj
doloraj mortoj ili mortos; ili ne estos priplorataj
nek enterigitaj, ili estos kiel sterko sur la supraĵo de
la tero; de glavo kaj de malsato ili pereos, kaj iliaj
kadavroj estos manĝaĵo por la birdoj de la ĉielo kaj
por la bestoj de la tero. 5 Ĉar tiele diras la Eternulo:
Ne eniru en la domon de plorado, ne iru funebri,
kaj ne konsolu ilin; ĉar Mi forprenis de tiu popolo
Mian pacon, diras la Eternulo, la favorkorecon kaj la
kompaton. 6 Mortos la granduloj kaj la malgranduloj
en tiu lando; ili ne estos enterigitaj nek priplorataj;
oni ne faros al si tranĉojn nek kalvaĵon pro ili. 7 Oni
ne disdonos inter ili panon de funebro, por konsoli
ilin pri la mortinto, kaj oni ne trinkigos al ili kalikon
de konsolo pri ilia patro kaj pri ilia patrino. 8 Ankaŭ
en la domon de festeno ne iru, por sidi kun ili, por
manĝi kaj trinki. 9 Ĉar tiele diras la Eternulo Cebaot,
Dio de Izrael: Jen Mi forigos de ĉi tiu loko antaŭ viaj
okuloj kaj dum via vivo la sonojn de ĝojo kaj la sonojn
de gajeco, la voĉon de fianĉo kaj la voĉon de fianĉino.
10 Kiam vi diros al tiu popolo ĉiujn ĉi tiujn vortojn, kaj
ili diros al vi: Pro kio la Eternulo eldiris pri ni tiun
tutan grandan malfeliĉon? kia estas nia krimo, kaj kia
estas nia peko, kiun ni pekis antaŭ la Eternulo, nia
Dio? — 11 tiam diru al ili: Pro tio, ke viaj patroj forlasis
Min, diras la Eternulo, kaj sekvis aliajn diojn kaj servis
kaj adorkliniĝis al ili, dum Min ili forlasis kaj Mian
instruon ne obeis; 12 kaj vi agas ankoraŭ pli malbone
ol viaj patroj, kaj ĉiu el vi sekvas la obstinecon de sia
malbona koro, ne aŭskultante Min; 13 tial Mi elĵetos
vin el ĉi tiu lando en landon, kiun ne konis vi nek viaj
patroj, kaj vi servos tie al aliaj dioj tage kaj nokte,
ĉar Mi ne donos al vi indulgon. 14 Pro tio jen venos
tempo, diras la Eternulo, kiam oni ne plu diros: Vivas
la Eternulo, kiu elkondukis la Izraelidojn el la lando
Egipta; 15 sed: Vivas la Eternulo, kiu elkondukis la
Izraelidojn el la lando norda, kaj el ĉiuj landoj, kien
Li dispelis ilin; ĉar Mi revenigos ilin en ilian landon,
kiun Mi donis al iliaj patroj. 16 Jen Mi sendos multe da
fiŝkaptistoj, diras la Eternulo, por kapti ilin; poste Mi
sendos multe da ĉasistoj, por ĉasi ilin de ĉiu monto,
de ĉiu monteto, kaj el la fendoj de la rokoj. 17 Ĉar Miaj
okuloj vidas ĉiujn iliajn vojojn; ili ne estas kovritaj
antaŭ Mi, kaj iliaj malbonagoj ne estas kaŝitaj antaŭ
Miaj okuloj. 18 Antaŭ ĉio Mi duoble pagos pro iliaj
malbonagoj kaj iliaj pekoj, pro tio, ke ili malpurigis
Mian landon: per la kadavroj de siaj idoloj kaj per
siaj abomenindaĵoj ili plenigis Mian heredaĵon. 19 Ho
Eternulo, mia forto kaj mia fortikeco kaj mia rifuĝo
en tempo de malfeliĉo! al Vi venos nacioj de la randoj
de la tero, kaj diros: Nur malverajn diojn heredis niaj
patroj; ili estas vantaĵo, ili taŭgas por nenio. 20 Ĉu
povas homo fari al si diojn? ili ne estas ja dioj. 21 Tial
jen Mi prudentigos ilin; tiun fojon Mi sentigos al ili
Mian manon kaj Mian forton; kaj ili ekscios, ke Mia
nomo estas Eternulo.

17 La peko de Jehuda estas skribita per fera skribilo,
per diamanta pinto, sur la tabelo de ilia koro
kaj sur la kornoj de iliaj altaroj. 2 Iliaj filoj bone
memoras iliajn altarojn kaj iliajn sanktajn stangojn
ĉe la verdaj arboj sur la altaj montetoj. 3 Ĉu Mia
monto estas sur la kampo? vian havon kaj ĉiujn viajn
trezorojn Mi fordonos por disrabo, viajn altaĵojn pro
la pekoj en ĉiuj viaj limoj. 4 Kaj vi estos elpuŝita el
la heredaĵo, kiun Mi donis al vi, kaj Mi servigos vin
al viaj malamikoj en lando, kiun vi ne konas; ĉar vi
ekbruligis fajron de Mia kolero, ĝi flamos eterne. 5
Tiele diras la Eternulo: Malbenita estas la homo, kiu
fidas homon kaj faris karnon lia apogo kaj kies koro
forturnis sin de la Eternulo. 6 Li estos kiel nuda arbo
en la dezerto; li ne vidos, kiam venos bono; li loĝos sur
sunbruligita loko, en lando senfrukta kaj ne loĝata. 7
Benita estas la homo, kiu fidas la Eternulon, kaj la
Eternulo estos lia apogo. 8 Li estos kiel arbo, plantita
ĉe akvo kaj etendanta siajn radikojn al torento; ĝi ne
timas, kiam venas varmego; ĝiaj folioj restas verdaj,
kaj en tempo de sekeco ĝi ne zorgas kaj ne ĉesas doni
fruktojn. 9 Malica estas ĉies koro, kaj nefidinda; kiu
povas ĝin ekkoni? 10 Sed Mi, la Eternulo, trapenetras

la koron, esploras la internon, por redoni al ĉiu laŭ
lia konduto, laŭ la fruktoj de liaj agoj. 11 Perdriko
kovas ovojn, kiujn ĝi ne naskis; tia estas tiu, kiu akiras
riĉecon per rimedoj maljustaj: en la mezo de sia vivo
li ĝin perdos, kaj en la fino li restos malsaĝulo. 12
Sed la loko de nia sanktejo estas trono de gloro, alta
de tempo antikva. 13 Ho Eternulo, espero de Izrael!
ĉiuj, kiuj forlasas Vin, estos hontigitaj, la defalintoj
estos skribitaj sur la tero; ĉar ili forlasis la Eternulon,
la fonton de viva akvo. 14 Sanigu min, ho Eternulo,
kaj mi estos sanigita; savu min, kaj mi estos savita;
ĉar Vi estas mia gloro. 15 Jen ili diras al mi: Kie estas
la vorto de la Eternulo? ĝi plenumiĝu. 16 Sed mi ne
forklinis min de tio, esti paŝtisto laŭ Via montro; la
tagon de malfeliĉo mi ne deziris, tion Vi scias; kio
eliris el mia buŝo, tio estis ĝusta antaŭ Via vizaĝo. 17
Ne estu por mi terura, Vi, mia rifuĝejo en la tago de
mizero! 18 Miaj persekutantoj estu hontigitaj, sed mi
ne estu hontigita; ili tremu, sed mi ne tremu; venigu
sur ilin tagon de mizero, kaj frapu ilin per duobla
frapo. 19 Tiele diris al mi la Eternulo: Iru kaj stariĝu
en la pordego de la simpla popolo, tiu pordego, tra kiu
eniras kaj eliras la reĝoj de Judujo, kaj en ĉiuj pordegoj
de Jerusalem; 20 kaj diru al ili: Aŭskultu la vorton de
la Eternulo, ho reĝoj de Judujo, kaj ĉiuj Judoj kaj ĉiuj
loĝantoj de Jerusalem, kiuj iras tra ĉi tiuj pordegoj. 21
Tiele diras la Eternulo: Gardu viajn animojn, kaj ne
portu ŝarĝojn en la tago sabata, kaj ne enportu ilin tra
la pordegoj de Jerusalem; 22 kaj ne elportu ŝarĝon el
viaj domoj en la tago sabata, kaj faru nenian laboron,
sed sanktigu la tagon sabatan, kiel Mi ordonis al viaj
patroj. 23 Sed ili ne aŭskultis kaj ne alklinis sian
orelon, sed obstinigis sian nukon, por ne aŭskulti kaj
por ne akcepti moralinstruon. 24 Se vi aŭskultos Min,
diras la Eternulo, kaj ne portos ŝarĝon tra la pordegoj
de ĉi tiu urbo en la tago sabata, sed vi sanktigos la
tagon sabatan, farante en ĝi nenian laboron: 25 tiam
tra la pordegoj de ĉi tiu urbo irados reĝoj kaj princoj,
sidantaj sur la trono de David, veturantaj sur ĉaroj kaj
ĉevaloj, ili kaj iliaj princoj, la Judoj kaj la loĝantoj de
Jerusalem, kaj ĉi tiu urbo estos loĝata eterne. 26 Kaj
oni venados el la urboj de Judujo, el la ĉirkaŭaĵoj de
Jerusalem, el la lando de Benjamen, de la ebenaĵo,
de la montoj, kaj de sudo, alportante bruloferojn kaj
buĉoferojn kaj farunoferojn kaj olibanon kaj dankajn
donacojn en la domon de la Eternulo. 27 Sed se vi
ne obeos Min, ke vi sanktigu la tagon sabatan kaj ne
portu ŝarĝon, irante tra la pordegoj de Jerusalem en
la tago sabata: tiam Mi ekbruligos en ĝiaj pordegoj
fajron, kiu ekstermos la palacojn de Jerusalem kaj ne
estingiĝos.

**18** Jen estas la vorto, kiu aperis al Jeremia de la
Eternulo: 2 Leviĝu kaj iru en la domon de la
potisto, kaj tie Mi aŭdigos al vi Miajn vortojn. 3 Kaj mi
iris en la domon de la potisto, kaj jen li laboras sur la
stablo. 4 Kaj kiam difektiĝis en la mano de la potisto
la vazo, kiun li estis faranta el argilo, li faris denove
alian vazon, kian al li plaĉis fari. 5 Tiam aperis al mi la
jena vorto de la Eternulo: 6 Ĉu Mi ne povas agi kun vi,
ho domo de Izrael, kiel tiu potisto? diras la Eternulo;
jen kiel la argilo en la mano de la potisto, tiel vi estas
en Mia mano, ho domo de Izrael. 7 Unu momenton
Mi decidas pri popolo kaj pri regno, ke Mi ĝin elŝiros,
disfrapos, kaj pereigos; 8 sed se tiu popolo pentas sian
malbonecon, pro kiu Mi decidis pri ĝi, tiam Mi ankaŭ
pentas pri la malfeliĉo, kiun Mi intencis fari al ĝi. 9
Alian fojon Mi decidas pri popolo kaj pri regno, ke
Mi ĝin fortikigos kaj enradikigos; 10 sed se ĝi faras
malbonon antaŭ Miaj okuloj, ne aŭskultante Mian
voĉon, tiam Mi pentas pri la bono, kiun Mi intencis
fari al ĝi. 11 Kaj nun diru al la Judoj kaj al la loĝantoj
de Jerusalem jene: Tiele diras la Eternulo: Jen Mi
preparas por vi malbonon kaj havas intencon kontraŭ
vi; revenu do ĉiu de sia malbona vojo, kaj rebonigu
vian konduton kaj viajn agojn. 12 Sed ili diras: Vane,
ni sekvos niajn intencojn, kaj ĉiu el ni agos laŭ la
obstineco de sia malbona koro. 13 Tial tiele diras la
Eternulo: Demandu inter la nacioj, ĉu iu aŭdis ion
similan; multe da abomenindaĵoj faris la filino de
Izrael. 14 Ĉu la neĝo de Lebanon ĉesas liveri akvon al
Miaj kampoj? ĉu ĉesigas sian iradon la malvarma akvo,
fluanta de malproksime? 15 Sed Mia popolo forgesis
Min, incensas al idoloj; per sia konduto ili senordigas
la vojojn eternajn, por iri laŭ vojo ne ebenigita, 16
por fari sian landon dezerto, eterna mokataĵo, tiel,
ke ĉiu, kiu trapasas ĝin, miras kaj balancas la kapon.
17 Kiel per orienta vento Mi disblovos ilin antaŭ la
malamiko; la nukon kaj ne la vizaĝon Mi montros
al ili en la tago de ilia pereo. 18 Ili diris: Ni iru kaj
interkonsiliĝu kontraŭ Jeremia; ĉar ne malaperis la
leĝinstruo ĉe la pastro, nek konsilo ĉe la saĝulo, nek
parolo ĉe la profeto; venu, ni batu lin per la lango, kaj
ni ne atentu liajn vortojn. 19 Atentu min, ho Eternulo,

kaj aŭskultu la voĉon de miaj kontraŭuloj. 20 Ĉu oni
devas repagi bonon per malbono? ĉar ili fosis foson
por mia animo. Memoru, kiel mi staris antaŭ Vi, por
paroli bonon pri ili, por forklini de ili Vian koleron. 21
Tial elmetu iliajn filojn al malsato kaj transdonu ilin
al glavo; iliaj edzinoj fariĝu seninfanaj kaj vidvinoj,
iliaj viroj estu frapitaj de morto, iliaj junuloj estu
mortigitaj de glavo en milito. 22 Kriado estu aŭdata el
iliaj domoj, kiam Vi subite venigos sur ilin amasojn,
pro tio, ke ili fosis foson, por kapti min, kaj reton ili
metis antaŭ miajn piedojn. 23 Vi, ho Eternulo, scias
ĉiujn iliajn intencojn kontraŭ mi, por mortigi min; ne
pardonu ilian malbonagon, kaj ilian pekon antaŭ Vi
ne elviŝu; faligu ilin antaŭ Vi; agu kontraŭ ili en la
tempo de Via kolero.

**19** Tiele diris la Eternulo: Iru kaj aĉetu argilan
kruĉon de potisto, kaj, preninte kelkajn el la
plejaĝuloj de la popolo kaj el la plejaĝuloj de la pastroj,
2 iru en la valon de la filo de Hinom, kiu estas antaŭ
la Pordego de Argilaĵoj, kaj proklamu tie la vortojn,
kiujn Mi diros al vi. 3 Kaj diru: Aŭskultu la vorton
de la Eternulo, ho reĝoj de Judujo kaj loĝantoj de
Jerusalem! tiele diras la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael:
Jen Mi venigos sur ĉi tiun lokon tian malfeliĉon, ke al
ĉiu, kiu aŭdos pri ĝi, eksonoros liaj oreloj. 4 Pro tio,
ke ili forlasis Min, kaj malpurigis ĉi tiun lokon, kaj
incensis sur ĝi al aliaj dioj, kiujn ne konis ili nek iliaj
patroj nek la reĝoj de Judujo, kaj plenigis ĉi tiun lokon
per sango de senkulpuloj; 5 kaj konstruis altaĵojn al
Baal, por forbruligi siajn filojn kiel bruloferojn al Baal,
kion Mi ne ordonis kaj ne diris, kaj kio eĉ ne venis
en Mian kapon: 6 pro tio jen venos tempo, diras la
Eternulo, kiam oni jam nomos ĉi tiun lokon ne Tofet
kaj valo de la filo de Hinom, sed valo de mortigado.
7 Kaj Mi detruos sur ĉi tiu loko la planon de Judujo
kaj Jerusalem; kaj Mi faligos ilin de glavo antaŭ iliaj
malamikoj, kaj de la mano de tiuj, kiuj serĉas ilian
animon, kaj Mi donos iliajn kadavrojn kiel manĝaĵon
al la birdoj de la ĉielo kaj al la bestoj de la tero. 8 Kaj
Mi faros ĉi tiun urbon dezerto kaj mokataĵo; ĉiu, kiu
preterpasos ĝin, miros kaj mokos ĉiujn ĝiajn frapojn.
9 Kaj Mi manĝigos al ili la karnon de iliaj filoj kaj la
karnon de iliaj filinoj, kaj ĉiu manĝos la karnon de sia
proksimulo, dum la sieĝo, kaj en la premado, per kiu
premos ilin iliaj malamikoj kaj la serĉantoj de iliaj
animoj. 10 Kaj disrompu la kruĉon antaŭ la okuloj
de tiuj viroj, kiuj venis kun vi; 11 kaj diru al ili: Tiele
diras la Eternulo Cebaot: Tiele Mi disrompos ĉi tiun
popolon kaj ĉi tiun urbon, kiel oni disrompas vazon de
potisto, ke ĝi ne povas esti tutaĵigita; kaj oni enterigos
en Tofet, ĉar ne ekzistos alia loko por enterigado. 12
Tiele Mi agos kun ĉi tiu loko, diras la Eternulo, kaj
kun ĝiaj loĝantoj, kaj Mi faros ĉi tiun lokon simila al
Tofet. 13 Kaj la domoj de Jerusalem kaj la domoj de
la reĝoj de Judujo estos malpuraj, kiel la loko Tofet,
ĉiuj domoj, sur kies tegmentoj oni incensis al la tuta
armeo de la ĉielo kaj verŝis verŝoferojn al aliaj dioj. 14
Kaj Jeremia venis de Tofet, kien sendis lin la Eternulo
por profeti; kaj li stariĝis sur la korto de la domo
de la Eternulo, kaj diris al la tuta popolo: 15 Tiele
diras la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael: Jen Mi venigos
sur ĉi tiun urbon kaj sur ĉiujn ĝiajn vilaĝojn la tutan
malfeliĉon, kiun Mi eldiris pri ĝi; ĉar ili obstinigis sian
nukon kaj ne aŭskultas Miajn vortojn.

**20** Kiam la pastro Paŝĥur, filo de Imer, la ĉefa oficisto
en la domo de la Eternulo, aŭdis, kiel Jeremia
profetis ĉion diritan, 2 Paŝĥur batis la profeton
Jeremia, kaj metis lin en karceron, kiu estis en la
supra Pordego de Benjamen ĉe la domo de la Eternulo.
3 La sekvantan tagon Paŝĥur ellasis Jeremian el la
karcero; tiam Jeremia diris al li: La Eternulo nomas
vin ne Paŝĥur, sed Teruro-ĉirkaŭe. 4 Ĉar tiele diras
la Eternulo: Jen Mi faros vin teruro por vi mem kaj
por ĉiuj viaj amikoj, kaj ili falos de la glavo de siaj
malamikoj; viaj okuloj tion vidos; kaj la tutan Judujon
Mi transdonos en la manojn de la reĝo de Babel,
kiu ekzilos ilin en Babelon kaj mortigos ilin per la
glavo. 5 Kaj la tutan havon de ĉi tiu urbo kaj ĝian
tutan laborakiron kaj ĉiujn ĝiajn valoraĵojn kaj ĉiujn
trezorojn de la reĝoj de Judujo Mi transdonos en la
manon de iliaj malamikoj, kiuj prirabos kaj prenos
kaj forportos ilin en Babelon. 6 Kaj vi, Paŝĥur, kaj
ĉiuj loĝantoj de via domo iros en kaptitecon, venos
Babelon, kaj tie vi mortos, kaj tie vi estos enterigitaj,
vi kaj ĉiuj viaj amikoj, al kiuj vi profetis malvere.
7 Ho Eternulo, Vi fortiris min post Vi, kaj mi lasis
fortiri min; Vi estas pli forta ol mi kaj venkis min;
kaj mi fariĝis objekto de ĉiutaga mokado, ĉiu mokas
min. 8 Ĉar de la tempo, kiam mi ekparolis, kriis pri
maljusteco, vokis pri rabado, la vorto de la Eternulo
fariĝis por mi kaŭzo de honto kaj de ĉiutaga mokado.
9 Mi diris al mi: Mi ne rememorigos pri Li, mi ne plu

parolos en Lia nomo; sed tio fariĝis en mia koro kiel
flamanta fajro, penetrinta en miajn ostojn, kaj mi
laciĝis de retenado kaj ne plu povis elteni. **10** Ĉar mi
aŭdas la insultadon de multaj kaj minacadon ĉirkaŭe:
Akuzu, ni akuzu lin! Ĉiuj, kiuj vivas pace kun mi,
observas min de flanke: Eble li forlogiĝos, tiam ni
venkos lin kaj venĝos al li. **11** Sed la Eternulo estas
kun mi kiel potenca heroo, tial miaj persekutantoj
falos kaj ne venkos; ili estos forte hontigitaj pro tio,
ke ili agis tiel malprudente; la honto estos eterna,
ne forgesiĝos. **12** Ho Eternulo Cebaot, kiu elprovas
virtulon kaj vidas la internon kaj la koron! faru, ke mi
vidu Vian venĝon sur ili, ĉar al Vi mi transdonis mian
proceson. **13** Kantu al la Eternulo, gloru la Eternulon;
ĉar Li savas la animon de malriĉulo el la mano de
malbonaguloj. **14** Malbenita estu la tago, en kiu mi
naskiĝis; la tago, en kiu mia patrino min naskis, ne
estu benita. **15** Malbenita estu la homo, kiu sciigis al
mia patro kaj diris: Virseksa infano estas naskita al vi,
kaj per tio li faris al li grandan ĝojon. **16** Tiu homo estu
kiel la urboj, kiujn la Eternulo senkompate ruinigis; li
aŭdu kriadon matene kaj ploregadon tagmeze. **17** Kial
mi ne estis mortigita en la utero, ke mia patrino estu
mia tombo kaj ŝia ventro restu graveda por ĉiam? **18**
Kial mi eliris el la utero, por vidi malfacilan penadon
kaj mizeron kaj por ke mia vivo pasu en honto?

**21** Jen estas la vorto, kiu aperis al Jeremia de
la Eternulo, kiam la reĝo Cidkija sendis al li
Paŝĥuron, filon de Malkija, kaj la pastron Cefanja,
filo de Maaseja, por diri: **2** Volu demandi pri ni la
Eternulon, ĉar Nebukadnecar, reĝo de Babel, militas
kontraŭ ni; eble la Eternulo faros al ni ion similan al
ĉiuj Liaj mirakloj, kaj tiu foriros de ni. **3** Kaj Jeremia
diris al ili: Tiele diru al Cidkija: **4** Tiele diras la
Eternulo, Dio de Izrael: Jen Mi returnos la batalilojn,
kiuj estas en viaj manoj kaj per kiuj vi batalas kontraŭ
la reĝo de Babel, kaj kontraŭ la Ĥaldeoj, kiuj sieĝas
vin ekstere de la murego, kaj Mi kolektos ilin meze
de ĉi tiu urbo. **5** Kaj Mi batalos kontraŭ vi per mano
etendita kaj per forta brako, en kolero, furiozo, kaj
granda indigno. **6** Kaj Mi frapos la loĝantojn de ĉi tiu
urbo, la homojn kaj la brutojn; de granda pesto ili
mortos. **7** Kaj post tio, diras la Eternulo, Cidkijan,
reĝon de Judujo, kaj liajn servantojn, kaj la popolon,
kaj tiujn, kiuj en ĉi tiu urbo restis de la pesto, de la
glavo, kaj de la malsato, Mi transdonos en la manon
de Nebukadnecar, reĝo de Babel, en la manon de iliaj
malamikoj, kaj en la manon de tiuj, kiuj deziras ilian
morton; kaj li mortigos ilin per glavo; li ne hezitos, ne
indulgos, kaj ne kompatos. **8** Kaj al ĉi tiu popolo diru:
Tiele diras la Eternulo: Jen Mi proponas al vi vojon de
vivo kaj vojon de morto: **9** kiu restos en ĉi tiu urbo,
tiu mortos de glavo aŭ de malsato aŭ de pesto; kaj
kiu eliros kaj transdonos sin al la Ĥaldeoj, kiuj vin
sieĝas, tiu restos vivanta, kaj lia animo estos lia akiro.
**10** Ĉar Mi turnis Mian vizaĝon kontraŭ ĉi tiun urbon
por malbono, ne por bono, diras la Eternulo; en la
manon de la reĝo de Babel ĝi estos transdonita, kaj li
forbruligos ĝin per fajro. **11** Kaj koncerne la domon de
la reĝo de Judujo aŭskultu la vorton de la Eternulo: **12**
Domo de David! diras la Eternulo: Frue matene faru
juĝon kaj savu prematon el la mano de premanto, por
ke Mia kolero ne aperu kiel fajro kaj ĝi ne ekflamu pro
viaj malbonagoj tiel, ke neniu povos ĝin estingi. **13**
Jen Mi iras kontraŭ vin, kiu staras en la valo, roko sur
la ebenaĵo, diras la Eternulo, kontraŭ vin, kiuj diras:
Kiu atakos nin? kaj kiu eniros en niajn loĝejojn? **14**
Kaj Mi punos vin laŭ la fruktoj de viaj agoj, diras la
Eternulo; kaj Mi ekbruligos fajron en ĝia arbaro, por
ke ĝi ekstermu ĝian tutan ĉirkaŭaĵon.

**22** Tiele diris la Eternulo: Iru en la domon de la reĝo
de Judujo, kaj diru tie jenon: **2** diru: Aŭskultu la
vorton de la Eternulo, ho reĝo de Judujo, kiu sidas sur
la trono de David, vi, kaj viaj servantoj, kaj via popolo,
kiu iras tra ĉi tiuj pordegoj. **3** Tiele diras la Eternulo:
Faru juĝon kaj juston, kaj savu prematon el la mano
de premanto; ne ofendu kaj ne premu fremdulon,
orfon, aŭ vidvinon, kaj sangon senkulpan ne verŝu sur
ĉi tiu loko. **4** Ĉar se vi plenumos ĉi tiun diron, tiam
tra la pordegoj de ĉi tiu domo irados reĝoj, sidantaj
sur la trono de David, veturantaj sur ĉaroj kaj sur
ĉevaloj, li mem kaj liaj servantoj kaj lia popolo. **5** Sed
se vi ne obeos tiujn vortojn, tiam — Mi ĵuras per Mi,
diras la Eternulo — ĉi tiu domo fariĝos ruino. **6** Ĉar
tiele diras la Eternulo koncerne la domon de la reĝo
de Judujo: Vi estas al Mi Gilead, supro de Lebanon;
kaj tamen Mi faros vin dezerto, urboj ne loĝataj. **7**
Mi starigos kontraŭ vi ekstermantojn, ĉiun kun liaj
bataliloj, kaj ili dehakos viajn plej bonajn cedrojn kaj
ĵetos en fajron. **8** Kaj multe da nacioj preterpasos
ĉi tiun urbon, kaj ili diros unu al la alia: Pro kio la
Eternulo agis tiele kun ĉi tiu granda urbo? **9** Kaj oni

respondos: Pro tio, ke ili forlasis la interligon de la
Eternulo, ilia Dio, kaj adorkliniĝis al aliaj dioj kaj
servis al ili. 10 Ne ploru pri mortinto kaj ne funebru
pri li; sed ploru forte pri tiu, kiu foriras, ĉar li ne plu
revenos kaj ne revidos la landon de sia naskiĝo. 11 Ĉar
tiele diras la Eternulo pri Ŝalum, filo de Joŝija, reĝo
de Judujo, kiu reĝis post sia patro Joŝija kaj foriris
de ĉi tiu loko: Li ne plu revenos ĉi tien; 12 sed sur
la loko, kien oni transloĝigis lin en kaptitecon, tie li
mortos, kaj ĉi tiun landon li ne plu vidos. 13 Ve al tiu,
kiu konstruas sian domon per malbonagoj kaj siajn
ĉambrojn en maljusteco; kiu devigas sian proksimulon
labori vane kaj ne donas al li lian prolaboran pagon;
14 kiu diras: Mi konstruos al mi grandan domon kaj
vastajn ĉambrojn; kaj trahakas al si fenestrojn kaj
kadras ilin per cedro kaj kolorigas per cinabro. 15 Ĉu
vi reĝos per tio, ke vi ĉirkaŭis vin per cedraĵo? via
patro ja ankaŭ manĝis kaj trinkis, sed li agis laŭjuĝe
kaj juste, kaj tiam estis al li bone. 16 Li juĝadis la
aferojn de premito kaj malriĉulo, kaj tiam estis bone.
Ĉu ne tio signifas koni Min? diras la Eternulo. 17
Sed viaj okuloj kaj via koro celas nur malhonestan
profiton, verŝadon de senkulpa sango, faradon de
rabado kaj de premado. 18 Tial tiele diras la Eternulo
pri Jehojakim, filo de Joŝija, reĝo de Judujo: Oni ne
lamentos pri li: Ho ve, mia frato! ho ve, fratino! oni ne
lamentos pri li: Ho ve, sinjoro! ho ve, glorulo! 19 Per
enterigo de azeno li estos enterigita: oni trenos lin
kaj ĵetos malproksimen de la pordegoj de Jerusalem.
20 Supreniru sur Lebanonon kaj kriu, kaj en Baŝan
laŭtigu vian voĉon, kaj kriu de Abarim; ĉar disbatitaj
estas ĉiuj viaj amantoj. 21 Mi parolis al vi, kiam vi
estis ankoraŭ en bona stato, sed vi diris: Mi ne volas
aŭskulti. Tia estis via konduto detempe de via juneco,
ke vi ne aŭskultis Mian voĉon. 22 Ĉiujn viajn paŝtistojn
forblovos la vento, kaj viaj amantoj iros en kaptitecon;
tiam vin kovros honto kaj malhonoro pro ĉiuj viaj
malbonagoj. 23 Vi sidas sur Lebanon, vi faris al vi
neston inter cedroj; kiel mizera vi estos, kiam atakos
vin doloroj, kiel doloroj de naskantino! 24 Kiel Mi
vivas, diras la Eternulo, se Konja, filo de Jehojakim,
reĝo de Judujo, eĉ estus sigelringo sur Mia dekstra
mano, eĉ de tie Mi vin deŝirus. 25 Kaj Mi transdonos
vin en la manon de tiuj, kiuj celas vian morton, kaj en
la manon de tiuj, kiujn vi timegas, en la manon de
Nebukadnecar, reĝo de Babel, kaj en la manon de la
Ĥaldeoj. 26 Kaj Mi ĵetos vin, kaj vian patrinon, kiu
naskis vin, en alian landon, kie vi ne naskiĝis; kaj tie
vi mortos. 27 Sed en la landon, kien ili tre dezirus
reveni, tien ili ne revenos. 28 Ĉu ĉi tiu homo, Konja,
estas objekto malestimata, forpuŝita? ĉu li estas vazo
neamata? kial ili estas forĵetitaj, li kaj lia idaro, ĵetitaj
en landon, kiun ili ne konis? 29 Ho tero, tero, tero!
aŭskultu la vorton de la Eternulo! 30 Tiele diras la
Eternulo: Enskribu ĉi tiun homon kiel seninfanan,
kiel homon, kiu ne havos sukceson en sia vivo; ĉar
neniu el lia idaro sukcesos sidi sur la trono de David
aŭ regos iam en Judujo.

23 Ve al la paŝtistoj, kiuj pereigas kaj diskurigas la
ŝafojn de Mia paŝtataro! diras la Eternulo. 2 Tial
tiele diras la Eternulo, Dio de Izrael, pri la paŝtistoj,
kiuj paŝtas Mian popolon: Vi diskurigis Miajn ŝafojn
kaj dispelis ilin kaj ne observis ilin; jen Mi punos sur
vi viajn malbonajn agojn, diras la Eternulo. 3 Sed
Mi kolektos la restaĵon de Miaj ŝafoj el ĉiuj landoj,
kien Mi dispelis ilin, kaj Mi revenigos ilin sur ilian
paŝtejon; kaj ili donos fruktojn kaj multiĝos. 4 Kaj Mi
starigos super ili paŝtistojn, por ke ili paŝtu ilin; kaj ili
jam ne timos kaj ne tremos kaj ne estos atakataj, diras
la Eternulo. 5 Jen venos tempo, diras la Eternulo, kaj
Mi aperigos de David markoton virtan, kaj ekregos
reĝo, kaj li estos prudenta, kaj li farados juĝon kaj
justecon sur la tero. 6 En lia tempo Jehuda estos savita
kaj Izrael loĝos sendanĝere; kaj jen estas la nomo,
per kiu oni lin nomos: La Eternulo estas nia justeco.
7 Pro tio jen venos tempo, diras la Eternulo, kiam
oni ne plu diros: Vivas la Eternulo, kiu elkondukis la
Izraelidojn el la lando Egipta; 8 sed: Vivas la Eternulo,
kiu elirigis kaj venigis la idaron de la domo de Izrael
el la lando norda, kaj el ĉiuj landoj, kien Mi dispelis
ilin; kaj ili ekloĝos en sia lando. 9 Pri la profetoj.
Disŝiriĝas en mi mia koro, ĉiuj miaj ostoj tremas; mi
fariĝis kiel ebriulo, kiel homo, senfortigita de vino,
antaŭ la Eternulo kaj antaŭ Liaj sanktaj vortoj. 10
Ĉar la lando estas plena de adultuloj, ĉar la lando
ploras de malbeno; sekiĝis la paŝtejoj de la stepo; ilia
celado estas malpia, kaj ilia forto estas en malvereco.
11 Ĉar profeto kaj pastro hipokritas; eĉ en Mia domo
Mi trovas iliajn malbonagojn, diras la Eternulo. 12 Pro
tio ilia vojo estos kiel glitigaj lokoj en mallumo: ili
glitos tie kaj falos; ĉar Mi venigos sur ilin malfeliĉon
en la jaro, kiam Mi punvizitos ilin, diras la Eternulo.
13 Ĉe la profetoj de Samario Mi vidis stultecon: ili

profetis en la nomo de Baal, kaj erarigis Mian popolon
Izrael; 14 sed ĉe la profetoj de Jerusalem Mi vidis
ion teruran: ili adultas, iras vojon de mensogoj, kaj
subtenas la manojn de malbonaguloj, por ke neniu el
ili konvertu sin de sia malboneco; ili ĉiuj fariĝis por
Mi kiel Sodom, kaj la loĝantoj de la urbo kiel Gomora.
15 Tial tiele diras la Eternulo Cebaot pri la profetoj: Jen
Mi manĝigos al ili vermuton kaj trinkigos al ili akvon
maldolĉan; ĉar de la profetoj de Jerusalem disvastiĝas
malpieco en la tuta lando. 16 Tiele diras la Eternulo
Cebaot: Ne aŭskultu la vortojn de la profetoj, kiuj
profetas al vi; ili trompas vin; ili predikas vizion de
sia koro, sed ne el la buŝo de la Eternulo. 17 Ili diras
al Miaj malŝatantoj: La Eternulo diris, ke al vi estos
paco; kaj al ĉiu, kiu sekvas la obstinecon de sia koro,
ili diras: Ne trafos vin malfeliĉo. 18 Sed kiu staris en la
konsilo de la Eternulo, kaj vidis kaj aŭdis Lian vorton?
kiu aŭdis Lian vorton kaj komprenis? 19 Jen eliros
ventego de la Eternulo en kolero, ventego turniĝanta;
ĝi falos sur la kapon de la malpiuloj. 20 Ne kvietiĝos
la kolero de la Eternulo, ĝis Li estos farinta kaj ĝis
Li estos plenuminta la intencojn de Sia koro; en la
tempo estonta vi tion komprenos. 21 Mi ne sendis
tiujn profetojn, sed ili mem kuris; Mi nenion diris al
ili, tamen ili profetas. 22 Se ili estus starintaj en Mia
konsilo, ili aŭdigus Miajn vortojn al Mia popolo kaj
deturnus ilin de ilia malbona vojo kaj de iliaj malbonaj
agoj. 23 Ĉu Mi estas nur Dio de proksime? diras la
Eternulo; ĉu Mi ne estas ankaŭ Dio de malproksime?
24 Ĉu homo povas kaŝi sin en tia sekreta loko, kie Mi
lin ne vidus? diras la Eternulo; ĉu ne Mi plenigas la
ĉielon kaj la teron? diras la Eternulo. 25 Mi aŭdas,
kion diras la profetoj, kiuj en Mia nomo profetas
malveraĵon; ili diras: Mi sonĝis, mi sonĝis. 26 Kiel
longe tio daŭros en la koro de la profetoj, kiuj profetas
malveraĵon, profetas la trompaĵon de sia koro? 27 Ili
pensas, ke ili forgesigos al Mia popolo Mian nomon
per siaj sonĝoj, kiujn ili rakontas unu al la alia, tiel
same, kiel iliaj patroj forgesis Mian nomon pro Baal.
28 Profeto, kiu vidis sonĝon, rakontu sonĝon; kaj tiu,
al kiu aperis Mia vorto, raportu Mian vorton vere. Kio
komuna estas inter pajlo kaj greno? diras la Eternulo.
29 Ĉu Mia vorto ne estas kiel fajro, diras la Eternulo,
kaj kiel martelo, kiu disbatas rokon? 30 Tial jen Mi
turnos Min kontraŭ la profetojn, diras la Eternulo,
kiuj ŝtelas Miajn vortojn unu de la alia. 31 Jen Mi
turnos Min kontraŭ la profetojn, diras la Eternulo,
kiuj esprimas sian propran parolon, kaj diras: Li diris.
32 Jen Mi turnos Min kontraŭ tiujn, kiuj profetas
malverajn sonĝojn, diras la Eternulo, kaj rakontas ilin
kaj erarigas Mian popolon per siaj mensogaĵoj kaj
per sia senprudenteco, dum Mi ne sendis ilin kaj ne
donis al ili ordonojn, kaj ili ja alportas al ĉi tiu popolo
nenian utilon, diras la Eternulo. 33 Se ĉi tiu popolo aŭ
profeto aŭ pastro demandos vin, dirante: Kia estas
la ŝarĝo de la Eternulo? tiam diru al ili koncerne la
ŝarĝon: Mi forlasos vin, diras la Eternulo. 34 Kaj se iu
el la profetoj aŭ pastroj aŭ el la popolo diros: Ŝarĝo de
la Eternulo, Mi punos tiun homon kaj lian domon.
35 Nur tiel diru ĉiu al sia proksimulo kaj ĉiu al sia
frato: Kion respondis la Eternulo? aŭ: Kion diris la
Eternulo? 36 Kaj la esprimon: Ŝarĝo de la Eternulo,
ne plu uzu; ĉar por ĉiu homo lia vorto fariĝos ŝarĝo,
pro tio, ke vi malĝustigas la vortojn de la vivanta
Dio, de la Eternulo Cebaot, nia Dio. 37 Tiele diru al la
profeto: Kion respondis al vi la Eternulo? kion diris la
Eternulo? 38 Sed se vi diros: Ŝarĝo de la Eternulo, tiam
tiele diras la Eternulo: Ĉar vi eldiris tiujn vortojn:
Ŝarĝo de la Eternulo, dum Mi sendis, por diri al vi, ke
vi ne uzu la esprimon: Ŝarĝo de la Eternulo: 39 tial
jen Mi tute forlasos kaj forpelos de antaŭ Mia vizaĝo
vin, kaj la urbon, kiun Mi donis al vi kaj al viaj patroj;
40 kaj Mi metos sur vin eternan honton kaj eternan
malhonoron, kiu ne forgesiĝos.

24 La Eternulo montris al mi: jen estas du korboj kun
figoj, starigitaj antaŭ la templo de la Eternulo,
post kiam Nebukadnecar, reĝo de Babel, forkondukis
el Jerusalem Jeĥonjan, filon de Jehojakim, reĝon de
Judujo, kaj la princojn de Judujo kaj la ĉarpentistojn
kaj seruristojn, kaj venigis ilin en Babelon. 2 Unu
korbo estis kun figoj tre bonaj, kiel estas la figoj
plej frue maturiĝintaj; la dua korbo estis kun figoj
tre malbonaj, kiujn pro ilia malboneco oni ne povas
manĝi. 3 Kaj la Eternulo diris al mi: Kion vi vidas,
Jeremia? Kaj mi respondis: Figojn; la bonaj figoj estas
tre bonaj, kaj la malbonaj estas tre malbonaj, tiel, ke
pro ilia malboneco oni ne povas ilin manĝi. 4 Tiam
aperis al mi la vorto de la Eternulo, dirante: 5 Tiele
diras la Eternulo, Dio de Izrael: Simile al ĉi tiuj bonaj
figoj, Mi distingos por bono la forkondukitajn Judojn,
kiujn Mi forsendis de ĉi tiu loko en la landon Ĥaldean;
6 kaj Mi direktos sur ilin Miajn okulojn por bono, kaj
Mi revenigos ilin en ĉi tiun landon, kaj Mi aranĝos

ilin, ne ruinigos, Mi plantos ilin, ne elŝiros. 7 Kaj Mi
donos al ili koron, ke ili konu Min, ke Mi estas la
Eternulo; ili estos Mia popolo, kaj Mi estos ilia Dio; ĉar
ili konvertiĝos al Mi per sia tuta koro. 8 Sed koncerne
la malbonajn figojn, kiujn oni ne povas manĝi pro ilia
malboneco, tiele diras la Eternulo: Al ili Mi similigos
Cidkijan, reĝon de Judujo, kaj liajn princojn, kaj la
restintajn Jerusalemanojn, kiuj restis en ĉi tiu lando
kaj kiuj loĝas en la lando Egipta; 9 kaj Mi donos al ili
suferadon kaj mizeron en ĉiuj regnoj de la tero, Mi
faros ilin objekto de honto, de ekzemplo, de moko, kaj
de malbeno sur ĉiuj lokoj, kien Mi dispelos ilin; 10 kaj
Mi sendos sur ilin glavon, malsaton, kaj peston, ĝis Mi
ekstermos ilin el la lando, kiun Mi donis al ili kaj al
iliaj patroj.

**25** Jen estas la vorto, kiu aperis al Jeremia pri la
tuta Juda popolo en la kvara jaro de Jehojakim,
filo de Joŝija, reĝo de Judujo, tio estas en la unua jaro
de Nebukadnecar, reĝo de Babel, 2 kaj kiun la profeto
Jeremia proklamis al la tuta Juda popolo kaj al ĉiuj
loĝantoj de Jerusalem, dirante: 3 De post la dek-tria
jaro de Joŝija, filo de Amon, reĝo de Judujo, ĝis la nuna
tago, en la daŭro de dudek tri jaroj, aperadis al mi la
vorto de la Eternulo, kaj mi paroladis al vi, konstante
paroladis; sed vi ne aŭskultis. 4 La Eternulo sendis
al vi ĉiujn Siajn servantojn, la profetojn; ĉiutage
Li sendadis; sed vi ne aŭskultis, vi ne alklinis vian
orelon, por aŭskulti. 5 Ili diris: Deturnu vin ĉiu de sia
malbona vojo kaj de viaj malbonaj agoj, kaj loĝu sur
la tero, kiun la Eternulo donis al vi kaj al viaj patroj
de ĉiam kaj por ĉiam; 6 kaj ne sekvu aliajn diojn,
servante kaj adorkliniĝante al ili, kaj ne kolerigu Min
per la faritaĵo de viaj manoj, por ke Mi ne faru al vi
malbonon. 7 Sed vi ne aŭskultis Min, diras la Eternulo;
vi kolerigis Min per la faritaĵo de viaj manoj por via
malbono. 8 Tial tiele diras la Eternulo Cebaot: Pro tio,
ke vi ne aŭskultis Miajn vortojn, 9 jen Mi sendos kaj
kolektos ĉiujn nordajn gentojn, diras la Eternulo, kaj
Mian servanton Nebukadnecar, reĝo de Babel, kaj Mi
venigos ilin sur ĉi tiun landon kaj sur ĝiajn loĝantojn
kaj sur ĉiujn naciojn ĉirkaŭe; kaj Mi elmetos ilin al
ekstermo, kaj Mi faros ilin ruinoj, mokataĵo, kaj eterna
dezertaĵo. 10 Kaj Mi ĉesigos ĉe ili la sonojn de ĝojo kaj
la sonojn de gajeco, la voĉon de fianĉo kaj la voĉon de
fianĉino, la bruon de muelilo kaj la lumon de lucerno.
11 Kaj ĉi tiu tuta lando fariĝos ruino kaj dezerto; kaj
tiuj nacioj servos al la reĝo de Babel dum sepdek jaroj.
12 Sed kiam finiĝos la sepdek jaroj, Mi punos la reĝon
de Babel kaj tiun nacion, diras la Eternulo, pro ĝiaj
malbonagoj, kaj la landon Ĥaldean, kaj Mi faros ĝin
eterna dezerto. 13 Kaj Mi plenumos super tiu lando
ĉiujn Miajn vortojn, kiujn Mi diris pri ĝi, ĉion, kio
estas skribita en ĉi tiu libro, kion Jeremia profetis pri
ĉiuj nacioj. 14 Ĉar ankaŭ ilin sklavigos potencaj nacioj
kaj grandaj reĝoj, kaj Mi repagos al ili laŭ iliaj agoj
kaj laŭ la faroj de iliaj manoj. 15 Ĉar tiele diras al
mi la Eternulo, Dio de Izrael: Prenu el Mia mano ĉi
tiun pokalon de la vino de furiozo, kaj trinkigu el ĝi
ĉiujn naciojn, al kiuj Mi sendas vin. 16 Ili trinku, ili
ŝanceliĝu kaj freneziĝu antaŭ la glavo, kiun Mi sendos
sur ilin. 17 Kaj mi prenis la pokalon el la mano de la
Eternulo, kaj trinkigis al ĉiuj popoloj, al kiuj sendis
min la Eternulo: 18 al Jerusalem kaj al la urboj de
Judujo, al iliaj reĝoj kaj al iliaj eminentuloj, por fari
ilin dezertaĵo kaj ruino, mokataĵo kaj malbenataĵo,
kiel tio estas nun; 19 al Faraono, reĝo de Egiptujo,
kaj al liaj servantoj kaj al liaj eminentuloj kaj al lia
tuta popolo; 20 kaj al ĉiuj diversgentaj popoloj kaj al
ĉiuj reĝoj de la lando Uc kaj al ĉiuj reĝoj de la lando
Filiŝta kaj al Aŝkelon kaj al Gaza kaj al Ekron kaj al
la restaĵo de Aŝdod; 21 al Edom kaj al Moab kaj al
la Amonidoj; 22 kaj al ĉiuj reĝoj de Tiro kaj al ĉiuj
reĝoj de Cidon kaj al la reĝoj de la insuloj trans la
maro; 23 al Dedan, al Tema, al Buz, kaj al ĉiuj, kiuj
tondas la harojn sur la tempioj; 24 kaj al ĉiuj reĝoj de
Arabujo, kaj al ĉiuj reĝoj de la diversgentaj popoloj,
loĝantaj en la dezerto; 25 kaj al ĉiuj reĝoj de Zimri
kaj al ĉiuj reĝoj de Elam kaj al ĉiuj reĝoj de Medujo;
26 kaj al ĉiuj reĝoj de la nordo, la proksimaj kaj la
malproksimaj, unu kontraŭ la alia, kaj al ĉiuj regnoj
de la mondo, kiuj troviĝas sur la tero; kaj la reĝo de
Ŝeŝaĥ trinkos post ili. 27 Kaj diru al ili: Tiele diras la
Eternulo Cebaot, Dio de Izrael: Trinku kaj ebriiĝu,
vomu kaj falu, kaj ne leviĝu antaŭ la glavo, kiun Mi
sendas sur vin. 28 Kaj se ili ne volos preni la pokalon
el via mano, por trinki, tiam diru al ili: Tiele diras la
Eternulo Cebaot: Vi nepre devas trinki. 29 Ĉar jen sur
la urbon, kiu portas sur si Mian nomon, Mi komencas
sendi suferojn; ĉu vi do restos senpunaj? vi ne restos
sen puno, ĉar Mi vokas glavon sur ĉiujn loĝantojn
de la tero, diras la Eternulo Cebaot. 30 Profetu al ili
ĉion ĉi tion, kaj diru al ili: La Eternulo ekbruos de
alte, kaj el Sia sankta loĝejo Li aŭdigos Sian voĉon;

Li forte ekbruos kontraŭ Sian restadejon; kanton de
vinpremantoj Li eksonigos super ĉiuj loĝantoj de la
tero. 31 La bruo atingos ĝis la fino de la tero; ĉar la
Eternulo havos juĝon kontraŭ la popoloj, Li juĝos ĉiun
karnon; la malpiulojn Li transdonos al glavo, diras
la Eternulo. 32 Tiele diras la Eternulo Cebaot: Jen
plago iros de popolo al popolo, kaj granda ventego
leviĝos de la randoj de la tero. 33 Kaj la mortigitoj de
la Eternulo en tiu tago estos de unu fino de la tero ĝis
la alia fino de la tero; ili ne estos priplorataj, ne estos
kolektataj, nek enterigataj; ili fariĝos sterko sur la
supraĵo de la tero. 34 Ploru, ho paŝtistoj, kriu kaj rulu
vin en polvo, ho regantoj de la ŝafoj; ĉar venis por vi
la tempo de buĉo; Mi disĵetos vin, kaj vi disfalos, kiel
multekosta vazo. 35 Kaj ne ekzistos forkuro por la
paŝtistoj, nek forsaviĝo por la regantoj de la ŝafaro. 36
Estos aŭdata kriado de la paŝtistoj kaj plorado de la
regantoj de la ŝafaro, ĉar la Eternulo faros ekstermon
en ilia ŝafaro. 37 Disfalos la pacaj loĝejoj antaŭ la
flama kolero de la Eternulo. 38 Li forlasis Sian laŭbon
kiel leono; ilia lando fariĝis dezerto de la kolero de la
atakanto kaj de Lia flama kolero.

**26** En la komenco de la reĝado de Jehojakim, filo
de Joŝija, reĝo de Judujo, aperis jena vorto de la
Eternulo: 2 Tiele diras la Eternulo: Stariĝu sur la korto
de la domo de la Eternulo, kaj parolu pri ĉiuj urboj de
Judujo, kiuj venas en la domon de la Eternulo por
adorkliniĝi, ĉiujn vortojn, kiujn Mi ordonis al vi diri
al ili; ne mankigu eĉ unu vorton. 3 Eble ili aŭskultos
kaj returnos sin ĉiu de sia malbona vojo; kaj tiam Mi
fordecidos la malbonon, kiun Mi intencas fari al ili
pro iliaj malbonaj agoj. 4 Kaj diru al ili: Tiele diras
la Eternulo: Se vi ne obeos Min, por agadi laŭ Mia
instruo, kiun Mi donis al vi, 5 por obei la vortojn
de Miaj servantoj, la profetoj, kiujn Mi sendas al vi,
kiujn Mi konstante sendadis, sed vi ilin ne aŭskultis: 6
tiam Mi agos kun ĉi tiu domo kiel kun Ŝilo, kaj ĉi tiun
urbon Mi faros malbeno por ĉiuj popoloj de la tero. 7
Kaj aŭdis la pastroj kaj la profetoj kaj la tuta popolo,
kiel Jeremia parolis tiujn vortojn en la domo de la
Eternulo. 8 Kiam Jeremia finis la paroladon de ĉio,
kion la Eternulo ordonis diri al la tuta popolo, tiam
kaptis lin la pastroj kaj la profetoj kaj la tuta popolo,
dirante: Vi devas morti! 9 Kial vi profetas en la nomo
de la Eternulo, dirante: Ĉi tiu domo fariĝos kiel Ŝilo,
kaj ĉi tiu urbo dezertiĝos tiel, ke estos en ĝi neniu
loĝanto? Kaj la tuta popolo amasiĝis ĉirkaŭ Jeremia
en la domo de la Eternulo. 10 Kiam la eminentuloj
de Judujo aŭdis pri tio, ili iris el la reĝa domo en la
domon de la Eternulo kaj sidiĝis ĉe la enirejo de la
nova pordego de la domo de la Eternulo. 11 Kaj la
pastroj kaj la profetoj diris al la eminentuloj kaj al
la tuta popolo jene: Al morto estas kondamninda ĉi
tiu homo, ĉar li profetis kontraŭ ĉi tiu urbo, kiel vi
aŭdis per viaj oreloj. 12 Tiam Jeremia diris al ĉiuj
eminentuloj kaj al la tuta popolo jene: La Eternulo
sendis min, por profeti kontraŭ ĉi tiu domo kaj ĉi tiu
urbo ĉion, kion vi aŭdis. 13 Plibonigu do nun viajn
vojojn kaj vian konduton, kaj obeu la voĉon de la
Eternulo, via Dio; kaj tiam la Eternulo fordecidos la
malbonon, kiun Li diris pri vi. 14 Kaj mi estas nun en
viaj manoj; faru kun mi tion, kion vi trovas bona kaj
justa. 15 Sed sciu, ke se vi min mortigos, vi ŝarĝos
per senkulpa sango vin kaj ĉi tiun urbon kaj ĝiajn
loĝantojn; ĉar vere la Eternulo sendis min al vi, por
diri en viajn orelojn ĉiujn tiujn vortojn. 16 Tiam la
eminentuloj kaj la tuta popolo diris al la pastroj kaj
al la profetoj: Ĉi tiu homo ne estas kondamninda al
morto, ĉar li parolis al ni en la nomo de la Eternulo,
nia Dio. 17 Kaj leviĝis kelkaj el la plejaĝuloj de la
lando, kaj diris al la tuta amaso de la popolo jene: 18
Miĥa, la Moreŝetano, profetis en la tempo de Ĥizkija,
reĝo de Judujo, kaj diris al la tuta Juda popolo jene:
Tiele diras la Eternulo Cebaot: Cion estos plugita kiel
kampo, Jerusalem fariĝos ruinaĵo, kaj la monto de
la templo fariĝos arbara altaĵo. 19 Ĉu mortigis lin
Ĥizkija, reĝo de Judujo, kaj ĉiuj Judoj? ili timis ja la
Eternulon kaj preĝis antaŭ la Eternulo, kaj la Eternulo
fordecidis la malbonon, kiun Li diris pri ili. Kaj ni farus
grandan malbonon kontraŭ niaj animoj. 20 Ankaŭ
alia homo profetis en la nomo de la Eternulo, Urija,
filo de Ŝemaja, el Kirjat-Jearim; li profetis kontraŭ
ĉi tiu urbo kaj ĉi tiu lando, simile al ĉio, kion diris
Jeremia. 21 Kaj liajn vortojn aŭdis la reĝo Jehojakim
kaj ĉiuj liaj potenculoj kaj ĉiuj eminentuloj, kaj la reĝo
intencis mortigi lin; sed Urija tion aŭdis, kaj ektimis,
kaj forkuris kaj venis en Egiptujon. 22 Kaj la reĝo
Jehojakim sendis homojn en Egiptujon: Elnatanon,
filon de Aĥbor, kune kun aliaj homoj li sendis en
Egiptujon; 23 kaj ili elkondukis Urijan el Egiptujo kaj
venigis lin al la reĝo Jehojakim; kaj ĉi tiu mortigis lin
per glavo kaj ĵetis lian kadavron inter la tombojn de
la simpla popolo. 24 Tamen la mano de Aĥikam, filo

de Ŝafan, protektis Jeremian, ne lasante transdoni lin
en la manojn de la popolo, por mortigi lin.

27 En la komenco de la reĝado de Jehojakim, filo
de Joŝija, reĝo de Judujo, aperis de la Eternulo
jena vorto al Jeremia: 2 Tiele diras al mi la Eternulo:
Faru al vi ligilojn kaj jugon, kaj metu tion sur vian
kolon; 3 kaj sendu tion al la reĝo de Edom kaj al la
reĝo de Moab kaj al la reĝo de la Amonidoj kaj al la
reĝo de Tiro kaj al la reĝo de Cidon, per la senditoj,
kiuj venis Jerusalemon al Cidkija, reĝo de Judujo; 4 kaj
komisiu al ili, ke ili diru al siaj sinjoroj jene: Tiele diras
la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael: Tiele diru al viaj
sinjoroj: 5 Per Mia granda forto kaj per Mia etendita
brako Mi kreis la teron, la homojn kaj la bestojn, kiuj
estas sur la tero; kaj Mi donas tion al tiu, kiu plaĉas
al Mi. 6 Kaj nun Mi transdonas ĉiujn tiujn landojn
en la manon de Mia servanto Nebukadnecar, reĝo de
Babel, kaj eĉ la bestojn de la kampo Mi transdonas al
li, por ke ili servu al li. 7 Kaj servos al li ĉiuj popoloj,
ankaŭ al lia filo kaj al la filo de lia filo, ĝis venos la
tempo ankaŭ por lia lando kaj lin sklavigos potencaj
popoloj kaj grandaj reĝoj. 8 Kaj se ia popolo kaj regno
ne servos al li, al Nebukadnecar, reĝo de Babel, kaj ne
metos sian kolon sub la jugon de la reĝo de Babel, Mi
punos tiun popolon per glavo kaj malsato kaj pesto,
diras la Eternulo, ĝis Mi ekstermos ilin per lia mano.
9 Ne aŭskultu do viajn profetojn, nek viajn magiistojn,
nek viajn sonĝoklarigistojn, nek viajn aŭguristojn,
nek viajn sorĉistojn, kiuj diras al vi jene: Ne servu al
la reĝo de Babel. 10 Ĉar ili profetas al vi malveraĵon,
por malproksimigi vin de via lando, por ke Mi elpelu
vin kaj vi pereu. 11 Sed tiun popolon, kiu metos sian
kolon sub la jugon de la reĝo de Babel kaj servos
al li, tiun Mi restigos trankvile sur ĝia tero, diras
la Eternulo, por prilaboradi ĝin kaj loĝi sur ĝi. 12
Kaj al Cidkija, reĝo de Judujo, mi diris tiajn samajn
vortojn, nome: Metu vian kolon sub la jugon de la
reĝo de Babel, kaj servu al li kaj al lia popolo, kaj restu
vivantaj. 13 Por kio vi volus morti, vi kaj via popolo,
de glavo, de malsato, kaj de pesto, kiel la Eternulo
decidis pri popolo, kiu ne servos al la reĝo de Babel?
14 Ne aŭskultu la vortojn de la profetoj, kiuj diras al vi,
ke vi ne servu al la reĝo de Babel; ĉar ili profetas al vi
malveraĵon. 15 Ĉar Mi ne sendis ilin, diras la Eternulo,
kaj ili malvere profetas en Mia nomo, por ke Mi elpelu
vin, kaj por ke vi pereu, vi kaj la profetoj, kiuj profetas
al vi. 16 Kaj al la pastroj kaj al la tuta ĉi tiu popolo
mi diris jene: Tiele diras la Eternulo: Ne aŭskultu la
vortojn de viaj profetoj, kiuj profetas al vi jene: Jen
la vazoj de la domo de la Eternulo nun baldaŭ estos
revenigitaj el Babel; ĉar malveraĵon ili profetas al vi.
17 Ne aŭskultu ilin; servu al la reĝo de Babel, por ke vi
vivu; por kio ĉi tiu urbo fariĝu dezerto? 18 Se ili estas
profetoj kaj se ili havas la vorton de la Eternulo, ili
elpetegu de la Eternulo Cebaot, ke la vazoj, kiuj restis
en la domo de la Eternulo kaj en la domo de la reĝo
de Judujo kaj en Jerusalem, ne transiru en Babelon. 19
Ĉar tiele diras la Eternulo Cebaot pri la kolonoj, pri la
maro, pri la bazoj, kaj pri la ceteraj vazoj, kiuj restis
en ĉi tiu urbo 20 kaj kiujn ne prenis Nebukadnecar,
reĝo de Babel, kiam li forkondukis Jeĥonjan, filon de
Jehojakim, reĝon de Judujo, el Jerusalem en Babelon,
kaj ankaŭ ĉiujn eminentulojn de Judujo kaj Jerusalem;
21 tiele diras la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael, pri la
vazoj, kiuj restis en la domo de la Eternulo kaj en la
domo de la reĝo de Judujo kaj en Jerusalem: 22 En
Babelon ili estos forportitaj, kaj tie ili restos, ĝis la
tago, kiam Mi rememoros ilin, diras la Eternulo, kaj
prenigos kaj reportigos ilin sur ĉi tiun lokon.

28 En tiu sama jaro, en la komenco de la reĝado
de Cidkija, reĝo de Judujo, en la kvara jaro, en
la kvina monato, Ĥananja, filo de Azur, profeto el
Gibeon, diris al mi en la domo de la Eternulo, antaŭ
la okuloj de la pastroj kaj de la tuta popolo, jene:
2 Tiele diras la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael: Mi
rompos la jugon de la reĝo de Babel; 3 post du jaroj
Mi revenigos sur ĉi tiun lokon ĉiujn vazojn de la domo
de la Eternulo, kiujn Nebukadnecar, reĝo de Babel,
prenis de ĉi tiu loko kaj forportis en Babelon. 4 Kaj
Jeĥonjan, filon de Jehojakim, reĝon de Judujo, kaj
ĉiujn forkondukitajn Judojn, kiuj venis en Babelon,
Mi revenigos sur ĉi tiun lokon, diras la Eternulo; ĉar
Mi rompos la jugon de la reĝo de Babel. 5 Tiam la
profeto Jeremia respondis al la profeto Ĥananja antaŭ
la okuloj de la pastroj, kaj de la tuta popolo, kiu staris
en la domo de la Eternulo; 6 kaj la profeto Jeremia
diris: Amen, tiel la Eternulo faru; la Eternulo plenumu
viajn vortojn, kiujn vi profetis, kaj Li revenigu el Babel
sur ĉi tiun lokon la vazojn de la domo de la Eternulo
kaj ĉiujn forkondukitojn. 7 Tamen aŭskultu la vorton,
kiun mi diros en viajn orelojn kaj en la orelojn de la
tuta popolo: 8 La profetoj, kiuj de antikva tempo estis

antaŭ mi kaj antaŭ vi, profetis al multaj landoj kaj al
grandaj regnoj militon, malfeliĉon, aŭ peston. 9 Se
profeto antaŭdiris pacon, tiam post la plenumiĝo de
la vorto de la profeto oni ekkonis lin kiel profeton,
kiun vere sendis la Eternulo. 10 Kaj la profeto Ĥananja
deprenis la jugon de la kolo de la profeto Jeremia kaj
rompis ĝin. 11 Kaj Ĥananja diris antaŭ la okuloj de
la tuta popolo jene: Tiele diras la Eternulo: Simile
al ĉi tio Mi rompos la jugon de Nebukadnecar, reĝo
de Babel, post du jaroj, deprenante ĝin de la kolo de
ĉiuj popoloj. Kaj la profeto Jeremia iris sian vojon.
12 Kaj aperis jena vorto de la Eternulo al Jeremia,
post kiam la profeto Ĥananja forrompis la jugon de la
kolo de la profeto Jeremia: 13 Iru kaj diru al Ĥananja
jene: Tiele diras la Eternulo: Jugon lignan vi rompis,
sed vi faru anstataŭ ĝi jugon feran. 14 Ĉar tiele diras
la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael: Feran jugon Mi
metis sur la kolon de ĉiuj tiuj popoloj, ke ili servu al
Nebukadnecar, reĝo de Babel, kaj ili servos al li; eĉ la
bestojn de la kampo Mi transdonis al li. 15 Tiam la
profeto Jeremia diris al la profeto Ĥananja: Aŭskultu,
Ĥananja; la Eternulo vin ne sendis, kaj vi kredigas
al ĉi tiu popolo malveraĵon. 16 Pro tio tiele diras la
Eternulo: Jen Mi forigos vin de sur la tero; en ĉi tiu
jaro vi mortos, ĉar vi parolis kontraŭ la volo de la
Eternulo. 17 Kaj la profeto Ĥananja mortis en tiu jaro,
en la sepa monato.

**29** Jen estas la vortoj de la letero, kiun la profeto
Jeremia sendis el Jerusalem al la plej gravaj
plejaĝuloj, kiuj estis forkondukitaj, kaj al la pastroj, al
la profetoj, kaj al la tuta popolo, kiujn Nebukadnecar
forkondukis el Jerusalem en Babelon 2 (post kiam
la reĝo Jeĥonja, kaj la reĝino, kaj la korteganoj, la
eminentuloj de Judujo kaj Jerusalem, la ĉarpentistoj
kaj forĝistoj foriris el Jerusalem); 3 per Eleasa, filo de
Ŝafan, kaj Gemarja, filo de Ĥilkija (kiujn Cidkija, reĝo
de Judujo, sendis en Babelon, al Nebukadnecar, reĝo
de Babel), li sendis jenajn vortojn: 4 Tiele diras la
Eternulo Cebaot, Dio de Izrael, al ĉiuj elpelitoj, kiujn
Mi elpelis el Jerusalem en Babelon: 5 Konstruu domojn
kaj loĝu, plantu ĝardenojn kaj manĝu iliajn fruktojn;
6 prenu edzinojn kaj naskigu filojn kaj filinojn, prenu
edzinojn por viaj filoj kaj edzinigu viajn filinojn, por
ke ili nasku filojn kaj filinojn; multiĝu tie kaj ne
malmultiĝu. 7 Zorgu pri la bonstato de tiu urbo, kien
Mi transloĝigis vin, kaj preĝu por ĝi al la Eternulo;
ĉar ĉe ĝia bonstato vi ankaŭ havos bonstaton. 8 Ĉar
tiele diras la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael: Viaj
profetoj, kiuj estas inter vi, kaj viaj magiistoj ne
forlogu vin; kaj ne atentu viajn sonĝojn, kiujn vi
sonĝas; 9 ĉar malveraĵon ili profetas al vi en Mia
nomo; Mi ne sendis ilin, diras la Eternulo. 10 Ĉar tiele
diras la Eternulo: Kiam en Babel pasos sepdek jaroj,
Mi rememoros vin kaj plenumos super vi Mian bonan
vorton, revenigante vin sur ĉi tiun lokon. 11 Ĉar Mi
scias la intencojn, kiujn Mi havas koncerne vin, diras
la Eternulo, intencojn al bono kaj ne al malbono, por
doni al vi estontecon kaj esperon. 12 Vi vokos al Mi,
kaj vi iros, kaj vi preĝos al Mi; kaj Mi aŭskultos vin. 13
Vi serĉos Min, kaj trovos, se vi serĉos Min per via tuta
koro. 14 Kaj Mi estos trovita de vi, diras la Eternulo,
kaj Mi revenigos viajn kaptitojn, kaj Mi kolektos vin
el ĉiuj popoloj kaj de ĉiuj lokoj, kien Mi forpelis vin,
diras la Eternulo; kaj Mi revenigos vin sur la lokon, de
kiu Mi transloĝigis vin. 15 Vane vi diras: La Eternulo
starigis al ni profetojn en Babel. 16 Ĉar tiele diras la
Eternulo pri la reĝo, kiu sidas sur la trono de David,
kaj pri la tuta popolo, kiu loĝas en ĉi tiu urbo, pri viaj
fratoj, kiuj ne iris kun vi en ekzilon; 17 tiele diras la
Eternulo Cebaot: Jen Mi sendos sur ilin glavon kaj
malsaton kaj peston, kaj Mi similigos ilin al malbonaj
figoj, kiujn oni ne povas manĝi pro ilia malboneco;
18 Mi persekutos ilin per glavo, per malsato, kaj per
pesto, kaj Mi faros ilin objekto de teruro por ĉiuj
regnoj de la tero, objekto de malbeno, mirego, moko,
kaj malhonoro inter ĉiuj popoloj, kien Mi dispelos
ilin; 19 pro tio, ke ili ne aŭskultis Miajn vortojn, diras
la Eternulo; Mi sendadis al ili Miajn servantojn, la
profetojn, Mi konstante sendadis, sed vi ne aŭskultis,
diras la Eternulo. 20 Kaj vi, ĉiuj forkondukitoj, kiujn Mi
foririgis el Jerusalem en Babelon, aŭskultu la vorton
de la Eternulo. 21 Tiele diras la Eternulo Cebaot, Dio de
Izrael, pri Aĥab, filo de Kolaja, kaj pri Cidkija, filo de
Maaseja, kiuj profetis al vi en Mia nomo malveraĵon:
Jen Mi transdonos ilin en la manon de Nebukadnecar,
reĝo de Babel, kaj li mortigos ilin antaŭ viaj okuloj. 22
Kaj ĉe ĉiuj ekzilitoj de Judujo, kiuj estas en Babel, ilia
nomo fariĝos objekto de malbeno, kaj oni dirados:
La Eternulo faru al vi tion, kion, kion al Cidkija kaj
Aĥab, kiujn la reĝo de Babel rostigis sur fajro — 23
pro tio, ke ili faris abomenindaĵon en Izrael, adultis
kun la edzinoj de siaj proksimuloj, kaj parolis en
Mia nomo malveraĵon, kiun Mi ne ordonis al ili.

Tion Mi scias kaj atestas, diras la Eternulo. 24 Kaj al
Ŝemaja, la Neĥelamano, diru jene: 25 Tiele diras la
Eternulo Cebaot, Dio de Izrael: Pro tio, ke vi sendis
en via nomo leterojn al la tuta popolo, kiu estas en
Jerusalem, kaj al la pastro Cefanja, filo de Maaseja, kaj
al ĉiuj pastroj, kun la sekvanta enhavo: 26 La Eternulo
starigis vin pastro anstataŭ la pastro Jehojada, por
ke vi estu kontrolanto en la domo de la Eternulo
super ĉiu frenezulo, kiu prezentas sin kiel profeto,
kaj vi metu lin en malliberejon kaj karceron; 27 kial
do vi ne faris punparolon al Jeremia, la Anatotano,
kiu prezentas sin al vi kiel profeto? 28 Ĉar ankaŭ al
ni en Babelon li sendis, por diri: La kaptiteco estos
longa; konstruu domojn kaj loĝu, plantu ĝardenojn kaj
manĝu iliajn fruktojn. 29 Kaj la pastro Cefanja tralegis
tiun leteron en la orelojn de la profeto Jeremia. 30
Tial aperis jena vorto de la Eternulo al Jeremia: 31
Sendu al ĉiuj ekzilitoj, por diri: Tiele diras la Eternulo
pri Ŝemaja, la Neĥelamano: Pro tio, ke Ŝemaja profetis
al vi, kvankam Mi ne sendis lin, kaj li fidigis vin per
malveraĵo — 32 pro tio tiele diras la Eternulo: Jen
Mi punos Ŝemajan, la Neĥelamanon, kaj lian idaron:
neniu restos ĉe li meze de ĉi tiu popolo, kaj li ne
vidos la bonon, kiun Mi faros al Mia popolo, diras la
Eternulo; ĉar li parolis kontraŭ la volo de la Eternulo.

**30** Jena vorto aperis de la Eternulo al Jeremia: 2
Tiele diras la Eternulo, Dio de Izrael: Enskribu al
vi en libron ĉiujn vortojn, kiujn Mi diris al vi. 3 Ĉar
jen venos tempo, diras la Eternulo, kiam Mi revenigos
la kaptitojn de Mia popolo Izrael kaj Jehuda, diras
la Eternulo, kaj Mi revenigos ilin en la landon, kiun
Mi donis al iliaj patroj, kaj ili ĝin posedos. 4 Kaj jen
estas la vortoj, kiujn diris la Eternulo pri Izrael kaj
Jehuda: 5 Tiele diras la Eternulo: Voĉon de tumulto
kaj de teruro ni aŭdas, ne de paco. 6 Demandu kaj
rigardu, ĉu viro naskas? kial do Mi vidas, ke ĉiu viro
tenas siajn manojn ĉe siaj lumboj, kiel naskantino, kaj
ĉies vizaĝoj verdiĝis? 7 Ho ve, kiel granda estas tiu
tago! ne ekzistas simila al ĝi; tempo de mizero ĝi estas
por Jakob, sed li estos savita el ĝi. 8 En tiu tempo,
diras la Eternulo Cebaot, Mi forrompos lian jugon de
via kolo, kaj viajn ligilojn Mi disŝiros, kaj fremduloj
ne plu servigos lin. 9 Sed ili servos al la Eternulo,
sia Dio, kaj al David, sia reĝo, kiun Mi restarigos al
ili. 10 Kaj vi ne timu, ho Mia servanto Jakob, diras la
Eternulo, kaj ne tremu, ho Izrael; ĉar jen Mi savos
vin el malproksime kaj vian idaron el la lando de
ilia kaptiteco, kaj Jakob revenos kaj vivos trankvile
kaj pace, kaj neniu lin timigos. 11 Ĉar Mi estos kun
vi, diras la Eternulo, por savi vin; ĉar Mi ekstermos
ĉiujn popolojn, inter kiujn Mi disĵetis vin, sed vin
Mi ne ekstermos; Mi nur punos vin modere, por ke
Mi ne lasu vin tute sen puno. 12 Ĉar tiele diras la
Eternulo: Danĝera estas via vundo, kaj via ulcero estas
dolorplena. 13 Neniu juĝos vian aferon, por sanigi
vian vundon; bona kuracado ne ekzistas por vi. 14 Ĉiuj
viaj amikoj forgesis vin, ili vin ne serĉas; ĉar per frapo
de malamiko Mi frapis vin, per kruela puno, pro viaj
multaj malbonagoj, pro la forteco de viaj pekoj. 15
Kial vi krias pri via vundo, pri via danĝera malsano?
Mi tion faris al vi pro viaj multaj malbonagoj, pro la
forteco de viaj pekoj. 16 Tamen ĉiuj viaj manĝegantoj
estos manĝegitaj; kaj ĉiuj viaj premantoj, ĉiuj, iros
en kaptitecon; viaj ruinigintoj estos ruinigitaj; kaj
ĉiuj viajn rabintojn Mi faros rabitaj. 17 Mi donos al vi
kuracon, kaj Mi resanigos vin de viaj vundoj, diras la
Eternulo; ĉar ili nomis vin forpuŝitino, ho Cion, pri
kiu neniu demandas. 18 Tiele diras la Eternulo: Jen Mi
revenigos el kaptiteco la tendojn de Jakob, kaj liajn
loĝejojn Mi kompatos; kaj la urbo estos konstruita
sur sia monteto, kaj la templo estos starigita laŭ sia
ordo. 19 Kaj eliros el ili dankado kaj voĉo de gajuloj;
Mi multigos ilin, kaj ili ne malmultiĝos; Mi donos
al ili honoron, kaj ili ne malaltiĝos. 20 Kaj ili havos
filojn kiel antaŭe, kaj ilia komunumo forte staros
antaŭ Mi, kaj Mi punos ĉiujn iliajn premintojn. 21
Kaj ilia potenculo estos el ili mem, kaj ilia reganto
devenos el ilia propra mezo; Mi alproksimigos lin,
kaj li aliros al Mi; ĉar kiu alia kuraĝos en sia koro
alproksimiĝi al Mi? diras la Eternulo. 22 Kaj vi estos
Mia popolo, kaj Mi estos via Dio. 23 Jen eliros ventego
de la Eternulo en kolero, ventego detruanta; ĝi falos
sur la kapon de la malpiuloj. 24 Ne kvietiĝos la flama
kolero de la Eternulo, ĝis Li estos farinta kaj ĝis Li
estos plenuminta la intencojn de Sia koro; en la tempo
estonta vi tion komprenos.

**31** En tiu tempo, diras la Eternulo, Mi estos Dio de
ĉiuj familioj de Izrael, kaj ili estos Mia popolo. 2
Tiele diras la Eternulo: En la dezerto trovis favoron
popolo, kiu restis ne ekstermita de la glavo; Izrael
iras al sia trankviliĝo. 3 De malproksime aperis al
mi la Eternulo, dirante: Mi ekamis vin per amo

eterna, tial Mi altiris vin favorkore. 4 Denove Mi
aranĝos vin, kaj vi estos aranĝita, ho virgulino de
Izrael; denove vi ornamos vin per viaj tamburinoj
kaj eliros en dancrondojn de gajuloj. 5 Denove vi
plantos vinberĝardenojn sur la montoj de Samario;
oni plantos kaj ricevos fruktojn. 6 Ĉar venos la tempo,
kiam gardistoj sur la monto de Efraim vokos: Leviĝu,
kaj ni iru sur Cionon al la Eternulo, nia Dio. 7 Ĉar tiele
diras la Eternulo: Kantu ĝojon al Jakob kaj ĝojkriu
antaŭ la kapoj de la nacioj, proklamu, gloru, kaj
diru: Savu, ho Eternulo, Vian popolon, la restaĵon
de Izrael. 8 Jen Mi venigos ilin el la lando norda,
kaj kolektos ilin de la randoj de la tero, kune kun la
blinduloj kaj lamuloj, gravedulinoj kaj naskintinoj;
en granda amaso ili revenos ĉi tien. 9 Kun ploro ili
venos, kun preĝoj Mi kondukos ilin; Mi irigos ilin
apud torentoj da akvo, laŭ vojo ĝusta, sur kiu ili ne
falpuŝiĝos; ĉar Mi fariĝis patro por Izrael, kaj Efraim
estas Mia unuenaskito. 10 Aŭskultu la vorton de la
Eternulo, ho nacioj, kaj sciigu al la malproksimaj
insuloj, kaj diru: La disĵetinto de Izrael kolektos lin
kaj gardos lin, kiel paŝtanto sian paŝtataron. 11 Ĉar la
Eternulo elaĉetis Jakobon kaj liberigis lin el la mano
de plifortulo. 12 Kaj ili venos kaj kantos sur la altaĵo
de Cion; kaj ili rapidos al la bonaĵoj de la Eternulo,
al la greno, al la mosto, al la oleo, al la ŝafidoj kaj
bovidoj; kaj ilia animo estos kiel akvoriĉa ĝardeno, kaj
ili ne plu havos malĝojon. 13 Tiam virgulino gajos en
la dancrondo, kaj kune ankaŭ junuloj kaj maljunuloj;
kaj Mi ŝanĝos ilian malĝojon en ĝojon, Mi konsolos
ilin kaj gajigos ilin post ilia aflikto. 14 Kaj la animon
de la pastroj Mi satigos per grasaĵoj, kaj Mia popolo
satiĝos per Miaj bonaĵoj, diras la Eternulo. 15 Tiele
diras la Eternulo: Voĉo estas aŭdata en Rama, ĝemado
kaj maldolĉa plorado: Raĥel priploras siajn filojn, ne
volas konsoliĝi pri siaj infanoj, ĉar ili forestas. 16
Tiele diras la Eternulo: Detenu vian voĉon de plorado
kaj viajn okulojn de larmoj; ĉar ekzistas rekompenco
por via laboro, diras la Eternulo, kaj ili revenos el la
lando de la malamiko. 17 Kaj ekzistas espero por via
idaro, diras la Eternulo, kaj la filoj revenos en siajn
limojn. 18 Mi aŭdis, kiel Efraim diras pentante: Vi
punis min, kaj mi estas punita, kiel bovido ne dresita;
konvertu min, kaj mi konvertiĝos; ĉar Vi, ho Eternulo,
estas mia Dio. 19 Kiam mi konvertiĝis, mi pentis; kaj
kiam mi estis punita, mi batis min sur la femurojn; mi
hontis kaj mi ruĝiĝis, ĉar mi portas la malhonoron de
mia juneco. 20 Ĉu Efraim ne estas Mia kara filo, Mia
amata infano? ĉar kion ajn Mi parolis pri li, Mi tamen
ankoraŭ rememoras lin; tial Mia interno afliktiĝas
pri li; Mi certe korfavoros lin, diras la Eternulo. 21
Starigu al vi gvidajn ŝtonojn, aranĝu al vi vojsignojn,
atentu la vojon, laŭ kiu vi iris; revenu, virgulino de
Izrael, revenu en ĉi tiujn viajn urbojn. 22 Ĝis kiam vi
turnados vin, ho defalinta filino? Ĉar la Eternulo kreis
ion novan sur la tero: virino ĉirkaŭos viron. 23 Tiele
diras la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael: Ankoraŭ oni
parolos jenajn vortojn en la Juda lando kaj en ĝiaj
urboj, kiam Mi revenigos iliajn kaptitojn: La Eternulo
vin benu, ho loĝejo de justeco, sankta monto! 24
Kaj loĝos apud ĝi Jehuda kune kun ĉiuj siaj urboj, la
terkultivistoj kaj la vagantoj kun paŝtataroj. 25 Ĉar Mi
sensoifigos animon lacan, kaj ĉiun animon malĝojan
Mi satigos. 26 Ĉe tio mi vekiĝis kaj ekrigardis, kaj mia
sonĝo estis agrabla por mi. 27 Jen venos la tempo,
diras la Eternulo, kiam Mi prisemos la domon de
Izrael kaj la domon de Jehuda per semo de homo kaj
semo de bruto. 28 Kaj tiel same, kiel Mi maldormis
super ili, por elradikigi, elŝiri, detrui, pereigi, kaj
malfeliĉigi, tiel Mi maldormos super ili, por konstrui
kaj planti, diras la Eternulo. 29 En tiu tempo oni ne
plu diros: La patroj manĝis nematurajn vinberojn, kaj
la dentoj de la filoj agaciĝis; 30 sed ĉiu mortos pro sia
propra kulpo, la dentoj agaciĝos ĉe tiu, kiu manĝis la
nematurajn vinberojn. 31 Jen venos la tempo, diras la
Eternulo, kiam Mi faros kun la domo de Izrael kaj la
domo de Jehuda interligon novan: 32 ne tian, kiel la
interligo, kiun Mi faris kun iliaj patroj, en la tago,
kiam Mi prenis ilian manon, por elkonduki ilin el la
lando Egipta, la interligo, kiun ili malobeis kaj Mi
devis altrudi al ili, diras la Eternulo; 33 sed jen estas la
interligo, kiun Mi faros kun la domo de Izrael post tiu
tempo, diras la Eternulo: Mi metos Mian leĝon en
ilian internon, kaj sur ilia koro Mi ĝin skribos, kaj
Mi estos ilia Dio, kaj ili estos Mia popolo. 34 Kaj ne
plu instruos ĉiu sian proksimulon kaj ĉiu sian fraton,
dirante: Ekkonu la Eternulon; ĉar ĉiuj Min konos, de
iliaj malgranduloj ĝis iliaj granduloj, diras la Eternulo;
ĉar Mi pardonos iliajn kulpojn, kaj iliajn pekojn Mi ne
plu rememoros. 35 Tiele diras la Eternulo, kiu donas
la sunon por lumo en la tago, leĝojn al la luno kaj al
la steloj por lumo en la nokto; kiu kvietigas la maron,
kiam bruas ĝiaj ondoj; kaj kies nomo estas Eternulo
Cebaot: 36 Se ĉi tiuj leĝoj neniiĝos antaŭ Mi, diras

la Eternulo, tiam ankaŭ la idaro de Izrael ĉesos esti
eterne popolo antaŭ Mi. 37 Tiele diras la Eternulo:
Se oni povos mezuri la ĉielon supre kaj esplori la
fundamenton de la tero malsupre, tiam Mi forpuŝos
la tutan idaron de Izrael pro ĉio, kion ili faris, diras la
Eternulo. 38 Jen venos la tempo, diras la Eternulo,
kiam denove konstruiĝos la urbo al la Eternulo, de la
turo Ĥananel ĝis la Pordego Angula. 39 Kaj la mezura
ŝnuro iros pluen ĝis la monteto Gareb kaj turniĝos
al Goa. 40 Kaj la tuta valo de kadavroj kaj de cindro,
kaj ĉiuj kampoj ĝis la torento Kidron, ĝis la angulo
de la Pordego de Ĉevaloj oriente, estos sanktaj al la
Eternulo, ne detruiĝos kaj ne plu ruiniĝos eterne.

**32** Jen estas la vorto, kiu aperis al Jeremia de la
Eternulo en la deka jaro de Cidkija, reĝo de
Judujo, tio estas en la dek-oka jaro de Nebukadnecar.
2 Tiam la militistaro de la reĝo de Babel sieĝis
Jerusalemon, kaj la profeto Jeremia estis malliberigita
sur la korto de la malliberejo, kiu estis apud la domo
de la reĝo de Judujo. 3 Tie malliberigis lin Cidkija, reĝo
de Judujo, dirante: Kial vi profetas, parolante, ke tiele
diras la Eternulo: Jen Mi transdonos ĉi tiun urbon en
la manon de la reĝo de Babel, kiu ĝin venkoprenos; 4
kaj Cidkija, reĝo de Judujo, ne saviĝos el la manoj de
la Ĥaldeoj, sed li estos transdonita en la manon de
la reĝo de Babel, kies buŝo parolos kun lia buŝo kaj
kies okuloj rigardos liajn okulojn; 5 kaj en Babelon
li forkondukos Cidkijan, kaj ĉi tiu restos tie, ĝis Mi
vizitos lin, diras la Eternulo; se vi militos kontraŭ la
Ĥaldeoj, vi ne sukcesos? 6 Kaj Jeremia diris: Aperis al
mi la vorto de la Eternulo, dirante: 7 Jen Ĥanamel, filo
de via onklo Ŝalum, iras al vi, por diri: Aĉetu al vi mian
kampon, kiu estas en Anatot, ĉar al vi apartenas la
rajto de parenco, por aĉeti. 8 Kaj venis al mi Ĥanamel,
filo de mia onklo, konforme al la vorto de la Eternulo,
sur la korton de la malliberejo, kaj li diris al mi: Aĉetu,
mi petas, mian kampon, kiu estas en Anatot, en la
lando de Benjamen; ĉar al vi apartenas la rajto de
heredo kaj la rajto de elaĉeto; aĉetu al vi. Tiam mi
komprenis, ke tio estas vorto de la Eternulo. 9 Kaj mi
aĉetis de Ĥanamel, filo de mia onklo, la kampon, kiu
estis en Anatot, kaj mi pesis al li la monon, dek sep
siklojn da arĝento. 10 Kaj mi skribis dokumenton kaj
sigelis; kaj mi invitis atestantojn, kaj pesis la arĝenton
per pesilo. 11 Kaj mi prenis la dokumenton de aĉeto, la
sigelitan laŭ juro kaj leĝo, kaj la nefermitan. 12 Kaj mi
donis la dokumenton de aĉeto al Baruĥ, filo de Nerija,
filo de Maĥseja, antaŭ la okuloj de mia kuzo Ĥanamel,
kaj antaŭ la okuloj de la atestantoj, kiuj subskribis
la dokumenton de aĉeto, kaj antaŭ la okuloj de ĉiuj
Judoj, kiuj sidis sur la korto de la malliberejo. 13 Kaj
mi ordonis al Baruĥ antaŭ iliaj okuloj, dirante: 14
Tiele diras la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael: Prenu
ĉi tiujn dokumentojn, ĉi tiun dokumenton de aĉeto,
la sigelitan, kaj ĉi tiun nefermitan, kaj metu ilin en
argilan vazon, por ke ili konserviĝu dum longa tempo.
15 Ĉar tiele diras la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael: Oni
denove aĉetos domojn, kampojn, kaj vinberĝardenojn
en ĉi tiu lando. 16 Kaj, transdoninte la dokumentojn
de aĉeto al Baruĥ, filo de Nerija, mi ekpreĝis al la
Eternulo, dirante: 17 Ho Sinjoro, ho Eternulo! Vi kreis
la ĉielon kaj la teron per Via granda forto kaj per Via
etendita brako; nenia afero estas nefarebla por Vi; 18
Vi faras favorkoraĵon al miloj, kaj pro la malbonagoj
de la patroj Vi repagas al iliaj filoj post ili. Vi, Dio
granda, potenca, kies nomo estas Eternulo Cebaot, 19
granda en Siaj decidoj kaj potenca en Siaj agoj; Vi,
kies okuloj estas malfermitaj super ĉiuj vojoj de la
homidoj, por redoni al ĉiu laŭ lia konduto kaj laŭ
la fruktoj de liaj agoj; 20 Vi, kiu faris signojn kaj
miraklojn en la lando Egipta ĝis la nuna tago super
Izrael kaj super la aliaj homoj, kaj faris al Vi gloran
nomon, kiel ĝi estas nune; 21 kaj Vi elkondukis Vian
popolon Izrael el la lando Egipta per signoj kaj per
mirakloj, per forta mano, per etendita brako, kaj per
granda teruro; 22 kaj Vi donis al ili ĉi tiun landon, pri
kiu Vi ĵuris al iliaj patroj, ke Vi donos al ili, landon, en
kiu fluas lakto kaj mielo; 23 kaj ili venis kaj ekposedis
ĝin, tamen ili ne aŭskultis Vian voĉon kaj ne sekvis
Vian instruon, ne faris ĉion, kion Vi ordonis al ili;
kaj Vi venigis sur ilin ĉi tiun tutan malfeliĉon. 24 Jen
remparoj alproksimiĝas al la urbo, por venkopreni
ĝin, kaj la urbo pro la glavo, malsato, kaj pesto estas
transdonata en la manojn de la Ĥaldeoj, kiuj militas
kontraŭ ĝi; kion Vi diris, tio fariĝas, kaj Vi tion vidas.
25 Kaj Vi, Sinjoro, ho Eternulo, diris al mi: Aĉetu
al vi la kampon pro mono, kaj starigu atestantojn;
dume la urbo estas transdonata en la manojn de la
Ĥaldeoj. 26 Tiam la vorto de la Eternulo aperis al
Jeremia, dirante: 27 Jen Mi, la Eternulo, estas Dio
de ĉiu karno; ĉu ekzistas por Mi io nefarebla? 28
Tial tiele diras la Eternulo: Jen Mi transdonas ĉi tiun
urbon en la manojn de la Ĥaldeoj, kaj en la manon

de Nebukadnecar, reĝo de Babel, kaj li venkoprenos
ĝin. 29 Kaj venos la Ĥaldeoj, kiuj militas kontraŭ ĉi
tiu urbo, kaj ekbruligos ĉi tiun urbon per fajro, kaj
forbruligos ĝin, kaj la domojn, sur kies tegmentoj
oni incensadis al Baal kaj faradis verŝoferojn al aliaj
dioj, por kolerigi Min. 30 Ĉar la Izraelidoj kaj la Judoj
faradis nur malbonon antaŭ Miaj okuloj detempe
de sia juneco; ĉar la Izraelidoj nur kolerigadis Min
per la faroj de siaj manoj, diras la Eternulo. 31 Ĉar
nur por Mia kolero kaj por Mia ĉagreno ekzistis ĉi
tiu urbo de la tago, kiam oni konstruis ĝin, ĝis la
nuna tago, tiel, ke Mi devas forpuŝi ĝin de antaŭ Mia
vizaĝo, 32 pro ĉiuj malbonaĵoj de la Izraelidoj kaj
Jehudaidoj, kiujn ili faris, por Min kolerigi, ili, iliaj
reĝoj, iliaj princoj, iliaj pastroj, iliaj profetoj, la Judoj,
kaj la loĝantoj de Jerusalem. 33 Ili turnis al Mi la
dorson, ne la vizaĝon; Mi instruadis ilin, konstante
instruadis, sed ili ne aŭskultis, ne akceptis admonon.
34 Siajn abomenindaĵojn ili metis en la domon, kiu
estas nomata per Mia nomo, kaj ili malpurigis ĝin. 35
Kaj ili aranĝis la altaĵojn de Baal, kiuj estas en la valo
de la filo de Hinom, por bruligi siajn filojn kaj filinojn
al Moleĥ, kion Mi ne ordonis al ili, kaj pri kio ne venis
al Mi en la kapon, ke ili faros tiun abomenindaĵon, por
pekigi Judujon. 36 Kaj tamen tiele diras la Eternulo,
Dio de Izrael, pri ĉi tiu urbo, pri kiu vi diras, ke ĝi
estas transdonata en la manon de la reĝo de Babel
per glavo, malsato, kaj pesto: 37 Jen Mi kolektos ilin el
ĉiuj landoj, kien Mi dispelis ilin en Mia kolero, en Mia
furiozo, kaj en granda indigno; kaj Mi revenigos ilin
sur ĉi tiun lokon kaj loĝigos ilin sendanĝere. 38 Kaj
ili estos Mia popolo, kaj Mi estos ilia Dio. 39 Kaj Mi
donos al ili unu koron kaj unu vojon, ke ili ĉiam timu
Min, por ke estu bone al ili kaj al iliaj idoj post ili.
40 Kaj Mi faros kun ili interligon eternan, ke Mi ne
dekliniĝos de ili en Mia bonfarado al ili; kaj timon je
Mi Mi metos en ilian koron, ke ili ne forturniĝu de Mi.
41 Kaj Mi ĝojos pri ili, bonfarante al ili, kaj Mi plantos
ilin en ĉi tiu lando fidele, per Mia tuta koro kaj per
Mia tuta animo. 42 Ĉar tiele diras la Eternulo: Kiel
Mi venigis sur ĉi tiun popolon tiun tutan grandan
malbonon, tiel Mi venigos sur ilin la tutan bonon,
kiun Mi eldiris pri ili. 43 Kaj kampoj estos aĉetataj
en ĉi tiu lando, pri kiu vi diras, ke ĝi estas dezerta,
ke ne troviĝas en ĝi homoj nek brutoj, ke ĝi estas
transdonita en la manojn de la Ĥaldeoj. 44 Oni aĉetos
kampojn per mono, oni enskribos en dokumentojn
kaj sigelos, kaj starigos atestantojn, en la lando en
Benjamen, en la ĉirkaŭaĵo de Jerusalem, en la urboj
de Judujo, en la urboj de la montoj, en la urboj de la
valoj, kaj en la urboj de la sudo; ĉar Mi revenigos ilin
el la kaptiteco, diras la Eternulo.

33 La vorto de la Eternulo aperis al Jeremia duafoje,
kiam li estis ankoraŭ tenata sur la korto de la
malliberejo, nome: 2 Tiele diras la Eternulo, kiu ĉion
faris, la Eternulo, kiu ĉion kreis, por ĝin fortikigi,
kaj kies nomo estas Eternulo: 3 Voku al Mi, kaj Mi
respondos al vi, kaj Mi sciigos al vi grandajn kaj
gravajn aferojn, kiujn vi ne scias. 4 Ĉar tiele diras la
Eternulo, Dio de Izrael, pri la domoj de ĉi tiu urbo,
kaj pri la domoj de la reĝoj de Judujo, kiuj estas
detruitaj por remparoj kaj por glavoj 5 de tiuj, kiuj
venis, por batali kontraŭ la Ĥaldeoj kaj plenigi ilin per
kadavroj de homoj, kiujn Mi frapis en Mia kolero kaj
en Mia indigno; ĉar Mi kaŝis Mian vizaĝon for de ĉi
tiu urbo pro ĉiuj iliaj malbonagoj: 6 Jen Mi redonos al
ĝi bonstaton kaj kuracon, kaj Mi resanigos ilin, kaj Mi
malkovros por ili abundon da paco kaj vero. 7 Kaj Mi
revenigos la kaptitojn de Jehuda kaj la kaptitojn de
Izrael, kaj Mi aranĝos ilin kiel antaŭe. 8 Kaj Mi purigos
ilin de ĉiuj iliaj malbonagoj, per kiuj ili pekis antaŭ
Mi; kaj Mi pardonos ĉiujn iliajn krimojn, per kiuj ili
pekis antaŭ Mi kaj defalis de Mi. 9 Kaj tio fariĝos por
Mi agrabla nomo, laŭdo kaj gloro antaŭ ĉiuj nacioj de
la tero, kiuj aŭdos pri la tuta bono, kiun Mi faras al ili,
kaj ili ektimos kaj ektremos pro la tuta bono kaj la
tuta bonstato, kiun Mi donos al ĝi. 10 Tiele diras la
Eternulo: Sur ĉi tiu loko — pri kiu vi diras, ke ĝi estas
dezertigita tiel, ke jam ne ekzistas homoj nek brutoj
en la urboj de Judujo kaj sur la stratoj de Jerusalem,
kiuj fariĝis malplenaj pro foresto de homoj kaj de
loĝantoj kaj de brutoj — 11 ankoraŭ estos aŭdataj
sonoj de ĝojo kaj sonoj de gajeco, voĉo de fianĉo
kaj voĉo de fianĉino, voĉo de homoj, kiuj parolos:
Laŭdu la Eternulon Cebaot, ĉar la Eternulo estas bona,
ĉar eterna estas Lia favorkoreco; kaj kiuj alportados
dankoferojn en la domon de la Eternulo; ĉar Mi
revenigos la forkaptitojn de la lando kiel antaŭe, diras
la Eternulo. 12 Tiele diras la Eternulo Cebaot: Sur ĉi tiu
loko, kiu dezertiĝis tiel, ke tie ne troviĝas homo nek
bruto, kaj en ĉiuj ĝiaj urboj denove troviĝos loĝejoj de
paŝtistoj, kiuj ripozigos tie siajn ŝafojn; 13 en la urboj
de la montoj, en la urboj de la valoj, en la urboj de

la sudo, en la lando de Benjamen, en la ĉirkaŭaĵo de
Jerusalem, kaj en la urboj de Judujo denove pasados
ŝafoj sub la mano de kalkulanto, diras la Eternulo. **14**
Jen venos tempo, diras la Eternulo, kiam Mi plenumos
la bonan vorton, kiun Mi diris pri la domo de Izrael
kaj pri la domo de Jehuda. **15** En tiuj tagoj kaj en tiu
tempo Mi elkreskigos al David markoton virtan, kiu
faros juĝon kaj justecon sur la tero. **16** En tiu tempo
Judujo estos savita, kaj Jerusalem ekvivos sendanĝere,
kaj oni nomos ĝin jene: La Eternulo estas nia justeco.
**17** Ĉar tiele diras la Eternulo: Ne mankos ĉe David
viro, sidanta sur la trono de la domo de Izrael. **18** Kaj
ĉe la pastroj Levidoj neniam mankos antaŭ Mi viro,
alportanta bruloferon kaj fumiganta farunoferon kaj
faranta buĉoferon. **19** Kaj aperis vorto de la Eternulo
al Jeremia, dirante: **20** Tiele diras la Eternulo: Se oni
povos ĉesigi Mian interligon pri la tago kaj Mian
interligon pri la nokto, kaj la tago kaj nokto ne estu
en sia tempo: **21** tiam povos esti ĉesigita Mia interligo
kun Mia servanto David, ke ne estu ĉe li filo, reĝanta
sur lia trono, kaj kun la Levidoj pastroj, Miaj servistoj.
**22** Kiel nekalkulebla estas la armeo de la ĉielo kaj
nemezurebla la sablo de la maro, tiel Mi multigos la
idaron de Mia servanto David, kaj la Levidojn, kiuj
faras servadon al Mi. **23** Kaj aperis vorto de la Eternulo
al Jeremia, dirante: **24** Ĉu vi ne vidas, kiel ĉi tiu popolo
parolas kaj diras: La du gentojn, kiujn la Eternulo
elektis, Li forpuŝis? Kaj ili malestimas Mian popolon,
kvazaŭ ĝi jam ne estus popolo antaŭ ili. **25** Tiele diras
la Eternulo: Se Mi ne farus interligon pri tago kaj
nokto kaj Miajn leĝojn pri la ĉielo kaj la tero, **26** tiam
Mi forpuŝus la idaron de Jakob kaj de Mia servanto
David, ne prenante el lia idaro regantojn super la
idaro de Abraham, Isaak, kaj Jakob; ĉar Mi revenigos
iliajn forkaptitojn kaj kompatos ilin.

**34** Jen estas la vorto, kiu aperis al Jeremia de la
Eternulo, kiam Nebukadnecar, reĝo de Babel,
kaj lia tuta militistaro, kaj ĉiuj regnoj de la tero,
kiuj estis sub la regado de lia mano, kaj ĉiuj popoloj
militis kontraŭ Jerusalem kaj kontraŭ ĉiuj ĝiaj urboj:
**2** Tiele diras la Eternulo, Dio de Izrael: Iru kaj parolu
al Cidkija, reĝo de Judujo, kaj diru al li: Tiele diras la
Eternulo: Jen Mi transdonos ĉi tiun urbon en la manon
de la reĝo de Babel, kaj li forbruligos ĝin per fajro; **3**
kaj vi ne saviĝos el lia mano, sed vi estos kaptita kaj
transdonita en lian manon, kaj viaj okuloj rigardos la
okulojn de la reĝo de Babel, kaj lia buŝo parolos kun
via buŝo, kaj vi iros en Babelon. **4** Tamen aŭskultu la
vorton de la Eternulo, ho Cidkija, reĝo de Judujo: Tiele
diras la Eternulo pri vi: Vi ne mortos de glavo; **5** vi
mortos en paco; kaj kiel oni faris brulon al viaj patroj,
la antaŭaj reĝoj, kiuj estis antaŭ vi, tiel oni faros
brulon al vi, kaj oni priploros vin: Ho ve, sinjoro! Ĉar
Mi parolis la vorton, diras la Eternulo. **6** Kaj la profeto
Jeremia raportis al Cidkija, reĝo de Judujo, ĉiujn tiujn
vortojn en Jerusalem, **7** dum la militistaro de la reĝo
de Babel militis kontraŭ Jerusalem, kaj kontraŭ ĉiuj
restintaj urboj de Judujo, kontraŭ Laĥiŝ kaj kontraŭ
Azeka; ĉar ili restis ankoraŭ el la fortikaĵaj urboj de
Judujo. **8** Jen estas la vorto, kiu aperis al Jeremia de la
Eternulo, post kiam la reĝo Cidkija faris interligon
kun la tuta popolo de Jerusalem, proklamante al ili
liberecon; **9** ke ĉiu forliberigu sian sklavon kaj sian
sklavinon, Hebreon kaj Hebreinon, por ke inter ili
neniu el la Judoj tenu sian fraton en sklaveco. **10** Kaj
obeis ĉiuj potenculoj kaj la tuta popolo, kiuj aliĝis al
la interligo, por ke ĉiu forliberigu sian sklavon kaj
sian sklavinon, por ne plu teni ilin en sklaveco; ili
obeis kaj forliberigis. **11** Sed poste ili denove reprenis
la sklavojn kaj la sklavinojn, kiujn ili forliberigis, kaj
devigis ilin fariĝi sklavoj kaj sklavinoj. **12** Tiam aperis
la vorto de la Eternulo al Jeremia, dirante: **13** Tiele
diras la Eternulo, Dio de Izrael: Mi faris interligon kun
viaj patroj en la tempo, kiam Mi elkondukis ilin el
la lando Egipta, el la domo de sklaveco, dirante: **14**
En ĉiu sepa jaro forliberigu ĉiu sian fraton Hebreon,
kiu estas vendita al vi kaj servis al vi ses jarojn, kaj
permesu al li foriri de vi tute libera; sed viaj patroj ne
aŭskultis Min kaj ne alklinis sian orelon. **15** Nun vi
pentis, kaj faris bonon antaŭ Miaj okuloj, proklamante
liberecon unu por la alia, kaj vi faris interligon antaŭ
Mi en la domo, kiu estas nomata per Mia nomo; **16**
sed vi ŝanĝiĝis, kaj malsanktigis Mian nomon, kaj
reprenis al vi ĉiu sian sklavon kaj sian sklavinon, kiujn
vi forliberigis, ke ili estu memstaraj, kaj vi devigis
ilin, ke ili estu por vi sklavoj kaj sklavinoj. **17** Tial tiele
diras la Eternulo: Vi ne obeis Min, ke vi proklamu
liberecon ĉiu al sia frato kaj unu al la alia; jen Mi
proklamas koncerne vin liberecon al la glavo, pesto,
kaj malsato, kaj Mi faros vin objekto de teruro por
ĉiuj regnoj de la tero. **18** Kaj Mi transdonos la homojn,
kiuj malobeis Mian interligon, kiuj ne plenumis la
vortojn de la interligo, kiun ili faris antaŭ Mi, kiam ili

dishakis la bovidon en du partojn kaj trairis tra la
dishakitaj partoj: 19 la eminentulojn de Judujo kaj
la eminentulojn de Jerusalem, la korteganojn kaj la
pastrojn, kaj la tutan popolon de la lando, kiuj trairis
tra la dishakitaj partoj de la bovido; 20 Mi transdonos
ilin en la manojn de iliaj malamikoj, kaj en la manojn
de tiuj, kiuj celas ilian morton; kaj iliaj kadavroj estos
manĝaĵo por la birdoj de la ĉielo kaj por la bestoj
de la tero. 21 Kaj Cidkijan, reĝon de Judujo, kaj liajn
eminentulojn Mi transdonos en la manojn de iliaj
malamikoj, kaj en la manojn de tiuj, kiuj celas ilian
morton, kaj en la manojn de la militistaro de la reĝo
de Babel, kiu foriris de vi. 22 Jen Mi faros ordonon,
diras la Eternulo, kaj Mi revenigos ilin al ĉi tiu urbo,
kaj ili atakos ĝin kaj venkoprenos ĝin kaj forbruligos
ĝin per fajro, kaj la urbojn de Judujo Mi faros dezerto
tiel, ke neniu en ĝi loĝos.

**35** Jen estas la vorto, kiu aperis al Jeremia de la
Eternulo en la tempo de Jehojakim, filo de Joŝija,
reĝo de Judujo: 2 Iru en la domon de la Reĥabidoj,
kaj parolu al ili, kaj venigu ilin en la domon de la
Eternulo en unu el la ĉambroj, kaj trinkigu al ili vinon.
3 Kaj mi prenis Jaazanjan, filon de Jeremia, filo de
Ĥabacinja, kaj liajn fratojn kaj ĉiujn liajn filojn kaj la
tutan domon de la Reĥabidoj; 4 kaj mi venigis ilin en
la domon de la Eternulo, en la ĉambron de la filoj
de Ĥanan, filo de Jigdalja, homo de Dio, kiu estas
apud la ĉambro de la princoj, super la ĉambro de
Maaseja, filo de Ŝalum, gardisto de pordego. 5 Kaj
mi starigis antaŭ la filoj de la domo de la Reĥabidoj
pokalojn plenajn de vino, kaj kalikojn, kaj mi diris al
ili: Trinku vinon. 6 Sed ili diris: Ni ne trinkas vinon,
ĉar nia patro Jonadab, filo de Reĥab, ordonis al ni,
dirante: Ne trinku vinon, vi kaj viaj infanoj, eterne;
7 kaj domon ne konstruu, kaj semon ne semu, kaj
vinberĝardenon ne plantu kaj ne posedu, sed loĝu
en tendoj dum via tuta vivo, por ke vi vivu longan
tempon sur la tero, sur kiu vi loĝas fremdule. 8 Kaj ni
obeis la voĉon de nia patro Jonadab, filo de Reĥab,
en ĉio, kion li ordonis al ni, ne trinkante vinon dum
nia tuta vivo, nek ni, nek niaj edzinoj, nek niaj filoj,
nek niaj filinoj, 9 kaj ne konstruante domojn por nia
loĝado, kaj ne havante por ni vinberĝardenon, nek
kampon, nek semadon; 10 sed ni loĝas en tendoj,
kaj obeas, kaj faras ĉion tiel, kiel ordonis al ni nia
patro Jonadab. 11 Kaj kiam Nebukadnecar, reĝo de
Babel, venis kontraŭ la landon, ni diris: Venu, ni iru
en Jerusalemon, for de la militistaro de la Ĥaldeoj kaj
de la militistaro de Sirio; kaj ni restis en Jerusalem. 12
Kaj aperis vorto de la Eternulo al Jeremia, dirante: 13
Tiele diras la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael: Iru kaj
diru al la Judujanoj kaj al la loĝantoj de Jerusalem: Ĉu
vi ne akceptos moralinstruon, obeante Miajn vortojn?
diras la Eternulo. 14 Plenumataj estas la vortoj de
Jonadab, filo de Reĥab, kiujn li ordonis al siaj filoj,
ke ili ne trinku vinon, kaj ili ne trinkas ĝis nun, ĉar
ili obeas la ordonon de sia patro; sed Mi diris al vi,
konstante diradis, kaj vi ne obeis Min. 15 Mi sendis al
vi ĉiujn Miajn servantojn, la profetojn, Mi konstante
sendadis, dirante: Deturnu vin ĉiu de sia malbona
vojo, plibonigu vian konduton, ne sekvu aliajn diojn,
servante al ili, tiam vi restos sur la tero, kiun Mi donis
al vi kaj al viaj patroj; sed vi ne alklinis vian orelon
kaj ne obeis Min. 16 La filoj de Jonadab, filo de Reĥab,
plenumis la ordonon de sia patro, kiun li donis al ili;
sed ĉi tiu popolo ne obeis Min. 17 Tial tiele diras la
Eternulo, Dio Cebaot, Dio de Izrael: Jen Mi venigos
sur Judujon kaj sur ĉiujn loĝantojn de Jerusalem la
tutan malbonon, kiun Mi eldiris pri ili, pro tio, ke Mi
parolis al ili kaj ili ne aŭskultis, Mi vokis al ili kaj ili ne
respondis. 18 Sed al la domo de la Reĥabidoj Jeremia
diris: Tiele diras la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael: Pro
tio, ke vi obeis la ordonon de via patro Jonadab kaj
observis ĉiujn liajn ordonojn, kaj agis konforme al
ĉio, kion li rekomendis al vi, 19 pro tio tiele diras la
Eternulo Cebaot, Dio de Izrael: Neniam mankos ĉe
Jonadab, filo de Reĥab, viro, staranta antaŭ Mi.

**36** En la kvara jaro de Jehojakim, filo de Joŝija, reĝo
de Judujo, aperis jena vorto al Jeremia de la
Eternulo: 2 Prenu al vi libron-rulaĵon, kaj skribu en
ĝin ĉiujn vortojn, kiujn Mi diris al vi pri Izrael kaj
pri Jehuda kaj pri ĉiuj nacioj, de la tago, en kiu Mi
parolis al vi, de la tempo de Joŝija ĝis la nuna tago. 3
Eble la domo de Jehuda aŭdos pri la tuta malbono,
kiun Mi intencas fari al ili, kaj ili returniĝos ĉiu de sia
malbona vojo, por ke Mi pardonu ilian malbonagon
kaj ilian pekon. 4 Kaj Jeremia alvokis Baruĥon, filon
de Nerija; kaj Baruĥ enskribis en libron-rulaĵon sub
diktado de Jeremia ĉiujn vortojn de la Eternulo, kiujn
Li diris al li. 5 Kaj Jeremia donis jenan ordonon al
Baruĥ: Mi estas malliberigita, mi ne povas iri en la
domon de la Eternulo; 6 iru do vi, kaj legu laŭ la

libro, kiun vi skribis sub mia diktado, la vortojn de la
Eternulo en la orelojn de la popolo en la domo de la
Eternulo en tago de fasto; kaj ankaŭ en la orelojn de
ĉiuj Judoj, kiuj venis el siaj urboj, legu tion. 7 Eble
falos ilia preĝo antaŭ la Eternulo, kaj ili returniĝos ĉiu
de sia malbona vojo; ĉar granda estas la kolero kaj
indigno, kiujn la Eternulo esprimis pri ĉi tiu popolo. 8
Kaj Baruĥ, filo de Nerija, plenumis ĉion, kion ordonis
la profeto Jeremia, kaj li voĉlegis el la libro la vortojn
de la Eternulo en la domo de la Eternulo. 9 En la kvina
jaro de Jehojakim, filo de Joŝija, reĝo de Judujo, en la
naŭa monato, oni proklamis faston antaŭ la Eternulo
al la tuta popolo en Jerusalem, kaj al la tuta popolo,
kiu venis el la urboj de Judujo en Jerusalemon. 10 Kaj
Baruĥ voĉlegis el la libro la vortojn de Jeremia en
la domo de la Eternulo, en la ĉambro de Gemarja,
filo de la kanceliero Ŝafan, sur la supra korto, ĉe la
nova pordego de la domo de la Eternulo, laŭte al la
tuta popolo. 11 Kaj Miĥaja, filo de Gemarja, filo de
Ŝafan, aŭdis el la libro ĉiujn vortojn de la Eternulo;
12 kaj li iris en la domon de la reĝo, en la ĉambron
de la kanceliero. Kaj jen tie sidis ĉiuj eminentuloj: la
kanceliero Eliŝama, Delaja, filo de Ŝemaja, Elnatan,
filo de Aĥbor, Gemarja, filo de Ŝafan, Cidkija, filo de
Ĥananja, kaj ĉiuj eminentuloj. 13 Kaj Miĥaja raportis
al ili ĉiujn vortojn, kiujn li aŭdis, kiam Baruĥ legis
el la libro en la orelojn de la popolo. 14 Tiam ĉiuj
eminentuloj sendis al Baruĥ Jehudin, filon de Netanja,
filo de Ŝelemja, filo de Kuŝi, por diri: La skribrulaĵon,
el kiu vi legis en la orelojn de la popolo, prenu en
vian manon, kaj venu. Kaj Baruĥ, filo de Nerija, prenis
kun si la skribrulaĵon, kaj venis al ili. 15 Kaj ili diris al
li: Sidiĝu, kaj voĉlegu ĝin al ni. Kaj Baruĥ voĉlegis
al ili. 16 Kiam ili aŭdis ĉiujn vortojn, ili eksentis
teruron unu antaŭ la alia, kaj ili diris al Baruĥ: Ni
raportos al la reĝo ĉiujn ĉi tiujn vortojn. 17 Kaj ili
demandis Baruĥon, dirante: Diru al ni, kiamaniere vi
skribis ĉiujn tiujn vortojn el lia buŝo? 18 Kaj Baruĥ
respondis al ili: El sia buŝo li elparolis al mi ĉiujn tiujn
vortojn, kaj mi skribis en la libron per inko. 19 Kaj
la eminentuloj diris al Baruĥ: Iru kaj kaŝiĝu, vi kaj
Jeremia, ke neniu sciu, kie vi estas. 20 Ili venis al la
reĝo en la palacon, kaj la skribrulaĵon ili restigis en la
ĉambro de la kanceliero Eliŝama; kaj ili raportis al la
reĝo ĉiujn vortojn. 21 Tiam la reĝo sendis Jehudin,
por preni la skribrulaĵon; kaj Jehudi prenis ĝin el la
ĉambro de la kanceliero Eliŝama, kaj voĉlegis ĝin al la
reĝo, kaj al ĉiuj eminentuloj, kiuj staris apud la reĝo.
22 La reĝo sidis en la vintra domo en la naŭa monato,
kaj antaŭ li brulis fajrujo. 23 Kaj ĉiufoje, kiam Jehudi
tralegis tri aŭ kvar kolumnojn, la reĝo detranĉis ilin
per tranĉileto de skribisto, kaj ĵetis en la fajron, kiu
estis en la fajrujo, ĝis la tuta skribrulaĵo forbrulis sur
la fajro, kiu estis en la fajrujo. 24 Kaj ne timis kaj ne
disŝiris siajn vestojn la reĝo, nek ĉiuj liaj servantoj,
kiuj aŭdis ĉiujn tiujn vortojn. 25 Kvankam Elnatan kaj
Delaja kaj Gemarja petis la reĝon, ke li ne forbruligu la
skribrulaĵon, li ne obeis ilin. 26 Kaj la reĝo ordonis al
Jeraĥmeel, filo de la reĝo, al Seraja, filo de Azriel, kaj
al Ŝelemja, filo de Abdeel, kapti la skribiston Baruĥ
kaj la profeton Jeremia; sed la Eternulo ilin kaŝis. 27
Kaj aperis jena vorto de la Eternulo al Jeremia, post
kiam la reĝo forbruligis la skribrulaĵon, kaj la vortojn,
kiujn Baruĥ skribis sub diktado de Jeremia: 28 Prenu
al vi denove alian skribrulaĵon, kaj skribu sur ĝi ĉiujn
antaŭajn vortojn, kiuj estis sur la unua skribrulaĵo,
kiun forbruligis Jehojakim, reĝo de Judujo. 29 Kaj pri
Jehojakim, reĝo de Judujo, diru: Tiele diras la Eternulo:
Vi forbruligis tiun skribrulaĵon, dirante: Kial vi skribis
sur ĝi, ke venos la reĝo de Babel kaj ruinigos ĉi tiun
landon kaj ekstermos sur ĝi homojn kaj brutojn? 30
Tial tiele diras la Eternulo pri Jehojakim, reĝo de
Judujo: Ne estos ĉe li sidanto sur la trono de David, kaj
lia kadavro estos ĵetita al la varmego de la tago kaj al
la malvarmo de la nokto; 31 kaj Mi punos lin kaj lian
idaron kaj liajn servantojn, pro ilia malbonago; kaj
Mi venigos sur ilin kaj sur la loĝantojn de Jerusalem
kaj sur la Judujanojn la tutan malbonon, pri kiu Mi
diris al ili, sed ili ne aŭskultis. 32 Kaj Jeremia prenis
alian skribrulaĵon, kaj donis ĝin al la skribisto Baruĥ,
filo de Nerija; kaj tiu skribis sur ĝi sub diktado de
Jeremia ĉiujn vortojn de la libro, kiun Jehojakim, reĝo
de Judujo, forbruligis per fajro; kaj al ili estis aldonitaj
ankoraŭ multaj similaj vortoj.

**37** Kaj ekreĝis la reĝo Cidkija, filo de Joŝija, anstataŭ
Konja, filo de Jehojakim, ĉar Nebukadnecar, reĝo
de Babel, faris lin reĝo en la Juda lando. 2 Li kaj liaj
servantoj kaj la popolo de la lando ne obeis la vortojn
de la Eternulo, kiujn Li diris per la profeto Jeremia.
3 Tamen la reĝo Cidkija sendis Jehuĥalon, filon de
Ŝelemja, kaj Cefanjan, filon de la pastro Maaseja, al la
profeto Jeremia, por diri: Preĝu, mi petas, por ni al la
Eternulo, nia Dio. 4 Jeremia tiam iradis libere inter la

popolo, kaj oni ne metis lin en malliberejon. 5 Dume
la militistaro de Faraono eliris el Egiptujo, kaj kiam la
Ĥaldeoj, kiuj sieĝis Jerusalemon, tion aŭdis, ili foriris
de Jerusalem. 6 Kaj aperis vorto de la Eternulo al la
profeto Jeremia, dirante: 7 Tiele diras la Eternulo, Dio
de Izrael: Tiele diru al la reĝo de Judujo, kiu sendis vin
al Mi, por demandi Min: Jen la militistaro de Faraono,
kiu eliris kun helpo al vi, iros returne en sian landon
Egiptujo. 8 Kaj la Ĥaldeoj revenos kaj militos kontraŭ
ĉi tiu urbo, kaj prenos ĝin kaj forbruligos ĝin per fajro.
9 Tiele diras la Eternulo: Ne trompu vin mem, dirante:
La Ĥaldeoj foriros de ni; ĉar ili ne foriros. 10 Ĉar se
vi eĉ venkobatus la tutan militistaron de la Ĥaldeoj,
kiu militas kontraŭ vi, kaj restus el ili nur kelkaj
vunditoj, ĉi tiuj leviĝus ĉiu el sia tendo kaj forbruligus
ĉi tiun urbon per fajro. 11 Kiam la militistaro de la
Ĥaldeoj, timante la militistaron de Faraono, foriris de
Jerusalem, 12 tiam Jeremia eliris el Jerusalem, por
iri en la landon de Benjamen, por ricevi sian tiean
heredaĵon inter la popolo. 13 Sed kiam li estis ĉe la
Pordego de Benjamen, tie estis la gardistestro, kies
nomo estis Jirija, filo de Ŝelemja, filo de Ĥananja; li
kaptis la profeton Jeremia, dirante: Vi volas transkuri
al la Ĥaldeoj. 14 Jeremia diris: Tio estas malvero, mi
ne volas transkuri al la Ĥaldeoj. Sed tiu ne aŭskultis
lin; kaj Jirija kaptis Jeremian kaj alkondukis lin al
la eminentuloj. 15 La eminentuloj ekkoleris kontraŭ
Jeremia, kaj batis lin, kaj metis lin en malliberejon, en
la domo de la skribisto Jonatan, ĉar tiun domon oni
faris malliberejo. 16 Post kiam Jeremia venis en la
malliberejon kaj en karceron, kaj Jeremia estis sidinta
tie longan tempon, 17 la reĝo Cidkija sendis kaj prenis
lin, kaj la reĝo sekrete en sia domo demandis lin,
dirante: Ĉu estas ia vorto de la Eternulo? Kaj Jeremia
diris: Estas: vi estos transdonita en la manon de la
reĝo de Babel. 18 Kaj Jeremia diris al la reĝo Cidkija:
Per kio mi pekis antaŭ vi aŭ antaŭ viaj servantoj aŭ
antaŭ ĉi tiu popolo, ke vi metis min en malliberejon?
19 Kaj kie estas viaj profetoj, kiuj profetis al vi, ke la
reĝo de Babel ne venos kontraŭ vin kaj kontraŭ ĉi tiun
landon? 20 Nun aŭskultu, mia sinjoro, ho reĝo, mia
petego falu antaŭ vi: ne revenigu min en la domon de
la skribisto Jonatan, mi ne mortu tie. 21 Tiam la reĝo
Cidkija ordonis, ke oni tenu Jeremian sur la korto de
la malliberejo; kaj oni donadis al li bulon da pano
ĉiutage el la strato de la bakistoj, ĝis konsumiĝis la
tuta pano en la urbo. Tiamaniere Jeremia restis sur la
korto de la malliberejo.

**38** Ŝefatja, filo de Matan, Gedalja, filo de Paŝĥur,
Juĥal, filo de Ŝelemja, kaj Paŝĥur, filo de Malkija,
aŭdis la vortojn, kiujn Jeremia parolis al la tuta
popolo, dirante: 2 Tiele diras la Eternulo: Kiu restos
en ĉi tiu urbo, tiu mortos de glavo, de malsato, aŭ de
pesto; sed kiu eliros al la Ĥaldeoj, tiu restos vivanta,
lia animo estos lia akiro, kaj li vivos. 3 Tiele diras la
Eternulo: Ĉi tiu urbo estos transdonita en la manojn
de la militistaro de la reĝo de Babel, kaj li venkoprenos
ĝin. 4 Tiam la eminentuloj diris al la reĝo: Oni devas
mortigi ĉi tiun homon, ĉar li senfortigas la manojn de
la militistoj, kiuj restis en ĉi tiu urbo, kaj la manojn
de la tuta popolo, parolante al ili tiajn vortojn; ĉar ĉi
tiu homo deziras al ĉi tiu popolo ne pacon, sed nur
malbonon. 5 Kaj la reĝo Cidkija diris: Jen li estas en
viaj manoj, ĉar la reĝo nenion povas fari kontraŭ via
volo. 6 Tiam ili prenis Jeremian, kaj ĵetis lin en la
kavon de Malkija, filo de la reĝo, kiu troviĝis sur la
korto de la malliberejo, kaj oni mallevis Jeremian per
ŝnuroj; en la kavo ne estis akvo, sed nur ŝlimo, kaj
Jeremia eniĝis en la ŝlimon. 7 Kaj Ebed-Meleĥ, Etiopo,
eŭnuko, kiu estis en la domo de la reĝo, aŭdis, ke oni
ĵetis Jeremian en la kavon; la reĝo tiam sidis ĉe la
Pordejo de Benjamen. 8 Tiam Ebed-Meleĥ eliris el la
domo de la reĝo, kaj ekparolis al la reĝo, dirante: 9 Mia
sinjoro, ho reĝo! malbone agis tiuj homoj, ke ili tion
faris al la profeto Jeremia, ke ili ĵetis lin en la kavon: li
mortos tie de malsato, ĉar jam en ekzistas pano en
la urbo. 10 Tiam la reĝo ordonis al la Etiopo Ebed-
Meleĥ, dirante: Prenu kun vi de ĉi tie tridek homojn,
kaj eltiru la profeton Jeremia el la kavo, antaŭ ol li
mortos. 11 Kaj Ebed-Meleĥ prenis kun si la homojn
kaj iris en la domon de la reĝo sub la trezorejon,
kaj prenis de tie malnovajn kaj eluzitajn ĉifonojn kaj
mallevis ilin per ŝnuroj al Jeremia en la kavon. 12
Kaj la Etiopo Ebed-Meleĥ diris al Jeremia: Metu la
eluzitajn ĉifonojn sub viajn akselojn sub la ŝnurojn;
kaj Jeremia tiel faris. 13 Kaj oni ektiris Jeremian per
la ŝnuroj kaj eltiris lin el la kavo; kaj Jeremia restis
sur la korto de la malliberejo. 14 Kaj la reĝo Cidkija
sendis, kaj venigis la profeton Jeremia al si, al la tria
enirejo de la domo de la Eternulo; kaj la reĝo diris
al Jeremia: Mi demandos de vi ion, kaŝu antaŭ mi
nenion. 15 Kaj Jeremia diris al Cidkija: Se mi diros al

vi, vi ja mortigos min; kaj se mi donos al vi konsilon,
vi ja ne obeos min. 16 Tiam la reĝo Cidkija sekrete
ĵuris al Jeremia, dirante: Mi ĵuras per la Eternulo, kiu
kreis al ni ĉi tiun animon, ke mi ne mortigos vin,
kaj ne transdonos vin en la manojn de tiuj homoj,
kiuj celas vian morton. 17 Kaj Jeremia diris al Cidkija:
Tiele diras la Eternulo, Dio Cebaot, Dio de Izrael: Se vi
eliros al la eminentuloj de la reĝo de Babel, via animo
restos vivanta, kaj ĉi tiu urbo ne estos forbruligita
per fajro, kaj vi kaj via domo vivos; 18 sed se vi ne
eliros al la eminentuloj de la reĝo de Babel, tiam ĉi tiu
urbo estos transdonita en la manojn de la Ĥaldeoj,
kaj ili forbruligos ĝin per fajro, kaj vi ne saviĝos el
iliaj manoj. 19 Kaj la reĝo Cidkija diris al Jeremia:
Mi timas la Judojn, kiuj transkuris al la Ĥaldeoj, ke
oni ne transdonu min en iliajn manojn, por ke ili
mokturmentu min. 20 Tiam Jeremia diris: Oni ne
transdonos vin; aŭskultu la voĉon de la Eternulo pri
tio, kion mi diras al vi; tiam estos bone al vi, kaj via
animo restos vivanta. 21 Sed se vi ne volos eliri, en tia
okazo jen estas tio, kion la Eternulo vidigis al mi: 22
Jen ĉiuj virinoj, kiuj restis en la domo de la reĝo de
Judujo, estos elkondukitaj al la eminentuloj de la reĝo
de Babel, kaj ili diros: Viaj konsolantoj forlogis vin kaj
superfortis vin; viaj piedoj enprofundiĝis en koton,
kaj tiuj foriĝis de vi. 23 Kaj ĉiujn viajn edzinojn kaj
viajn filojn oni forkondukos al la Ĥaldeoj, kaj vi ne
saviĝos el iliaj manoj; vi estos kaptita en la manojn
de la reĝo de Babel, kaj ĉi tiu urbo estos forbruligita
per fajro. 24 Kaj Cidkija diris al Jeremia: Neniu devas
scii tiujn vortojn, alie vi mortos. 25 Se la eminentuloj
aŭdos, ke mi parolis kun vi, kaj ili venos al vi, kaj diros
al vi: Sciigu al ni, kion vi diris al la reĝo, ne kaŝu antaŭ
ni, por ke ni ne mortigu vin, kaj kion la reĝo diris al
vi: 26 tiam respondu al ili: Mi humile petegis la reĝon,
ke li ne revenigu min en la domon de Jonatan, mi ne
mortu tie. 27 Kaj venis ĉiuj eminentuloj al Jeremia kaj
demandis lin, kaj li respondis al ili konforme al ĉiuj
vortoj, kiujn ordonis la reĝo; kaj ili silente foriris de
li, ĉar ili nenion eksciis. 28 Kaj Jeremia restis sur la
korto de la malliberejo ĝis la tago, en kiu Jerusalem
estis venkoprenita; kaj li tie estis, kiam Jerusalem
estis venkoprenita.

**39** En la naŭa jaro de Cidkija, reĝo de Judujo, en la
deka monato, venis Nebukadnecar, reĝo de Babel,
kun sia tuta militistaro al Jerusalem, kaj eksieĝis ĝin.
2 En la dek-unua jaro de Cidkija, en la kvara monato,
en la naŭa tago de la monato, oni faris enrompon en
la urbon. 3 Kaj eniris ĉiuj eminentuloj de la reĝo de
Babel, kaj haltis ĉe la Meza Pordego: Nergal-Ŝarecer,
Samgar-Nebu, Sarseĥim Rab-saris, Nergal-Ŝarecer
Rab-mag, kaj ĉiuj ceteraj eminentuloj de la reĝo de
Babel. 4 Kiam ilin ekvidis Cidkija, reĝo de Judujo, kaj
ĉiuj militistoj, ili forkuris, kaj eliris en la nokto el la
urbo tra la ĝardeno de la reĝo, tra la pordego inter
la du muregoj, kaj ili iris sur la vojon, kiu kondukas
al la stepo. 5 Sed la Ĥaldea militistaro postkuris
ilin, kaj atingis Cidkijan sur la stepo de Jeriĥo kaj
kaptis lin, kaj alkondukis lin al Nebukadnecar, reĝo
de Babel, en Riblan, en la lando Ĥamat, kaj ĉi tiu
eldiris verdikton kontraŭ li. 6 Kaj la reĝo de Babel
buĉis la filojn de Cidkija en Ribla antaŭ liaj okuloj,
kaj ĉiujn eminentulojn de Judujo la reĝo de Babel
buĉis. 7 Kaj la okulojn de Cidkija li blindigis, kaj li
ligis lin per katenoj, por forkonduki lin en Babelon. 8
Kaj la domon de la reĝo kaj la domojn de la popolo
la Ĥaldeoj forbruligis per fajro, kaj la muregojn de
Jerusalem ili detruis. 9 Kaj la ceteran popolon, kiu
restis en la urbo, kaj la transkurintojn, kiuj transkuris
al li, kaj la tutan reston de la popolo Nebuzaradan,
estro de la korpogardistoj, forkondukis en Babelon.
10 Sed la malriĉulojn el la popolo, kiuj nenion havis,
Nebuzaradan, estro de la korpogardistoj, restigis en
la lando Juda kaj donis al ili tiam vinberĝardenojn
kaj kampojn. 11 Sed pri Jeremia Nebukadnecar, reĝo
de Babel, ordonis al Nebuzaradan, la estro de la
korpogardistoj, jene: 12 Prenu lin, kaj atentu pri li,
kaj faru al li nenion malbonan, sed agu kun li nur
tiel, kiel li diros al vi. 13 Kaj sendis Nebuzaradan,
estro de la korpogardistoj, kaj Nebuŝazban Rab-saris,
kaj Nergal-Ŝarecar Rab-mag, kaj ĉiuj estroj de la
reĝo de Babel; 14 ili sendis, kaj prenis Jeremian el la
korto de la malliberejo, kaj transdonis lin al Gedalja,
filo de Aĥikam, filo de Ŝafan, ke li konduku lin en
sian domon; kaj li ekvivis inter la popolo. 15 Kaj al
Jeremia aperis jena vorto de la Eternulo, kiam li estis
ankoraŭ tenata sur la korto de la malliberejo: 16 Iru
kaj diru al la Etiopo Ebed-Meleĥ jene: Tiele diras la
Eternulo Cebaot, Dio de Izrael: Jen Mi plenumos Miajn
vortojn pri ĉi tiu urbo al malbono, ne al bono, kaj ili
plenumiĝos antaŭ via vizaĝo en tiu tempo. 17 Sed vin
Mi savos en tiu tempo, diras la Eternulo, kaj vi ne
estos transdonita en la manojn de tiuj homoj, kiujn vi

timas. 18 Ĉar Mi forsavos vin, kaj vi ne falos de glavo,
kaj via animo estos via akiro; ĉar vi fidis Min, diras la
Eternulo.

40 Jen estas la vorto, kiu aperis al Jeremia de la
Eternulo, post kiam Nebuzaradan, estro de la
korpogardistoj, forliberigis lin el Rama, kiam li prenis
lin, ligitan per ĉenoj, inter ĉiuj kaptitoj de Jerusalem
kaj Judujo, forkondukataj en Babelon. 2 Kaj la estro de
la korpogardistoj prenis Jeremian, kaj diris al li: La
Eternulo, via Dio, eldiris ĉi tiun malfeliĉon kontraŭ ĉi
tiu loko; 3 kaj la Eternulo tion venigis, kaj faris, kiel Li
diris, ĉar vi pekis antaŭ la Eternulo kaj ne aŭskultis
Lian voĉon; pro tio fariĝis al vi tia afero. 4 Kaj nun jen
hodiaŭ mi liberigis vin de la katenoj, kiuj estis sur viaj
manoj; se plaĉas al vi iri kun mi en Babelon, iru, kaj mi
zorgos pri vi; se ne plaĉas al vi iri kun mi en Babelon,
ne faru tion; vidu, la tuta lando estas antaŭ vi; kien
plaĉas al vi iri, tien iru. 5 (Dum li ankoraŭ ne foriris, )
Iru al Gedalja, filo de Aĥikam, filo de Ŝafan, kiun la
reĝo de Babel starigis kiel estron super la urboj de
Judujo, kaj restu kun li inter la popolo; aŭ kien plaĉas
al vi iri, tien iru. Kaj la estro de la korpogardistoj donis
al li manĝaĵon kaj donacon kaj forliberigis lin. 6 Kaj
Jeremia venis al Gedalja, filo de Aĥikam, en Micpan,
kaj ekloĝis kun li inter la popolo, kiu restis en la
lando. 7 Kiam ĉiuj militestroj, kiuj estis sur la kampo,
ili kaj iliaj homoj, aŭdis, ke la reĝo de Babel starigis
Gedaljan, filon de Aĥikam, kiel estron de la lando,
kaj ke li metis sub lian regadon la virojn, virinojn,
infanojn, kaj malriĉulojn de la lando, kiuj ne estis
transloĝigitaj en Babelon, 8 tiam ili venis al Gedalja en
Micpan: Iŝmael, filo de Netanja, Joĥanan kaj Jonatan,
filoj de Kareaĥ, Seraja, filo de Tanĥumet, la filoj de
Efaj, Netofaano, kaj Jezanja, filo de Maaĥatano, ili
kaj iliaj homoj. 9 Kaj Gedalja, filo de Aĥikam, filo de
Ŝafan, ĵuris al ili kaj al iliaj homoj, dirante: Ne timu
servi al la Ĥaldeoj, restu en la lando kaj servu al la
reĝo de Babel, kaj tiam estos al vi bone. 10 Mi restas
en Micpa, por ke mi povu stariĝi antaŭ la vizaĝo de la
Ĥaldeoj, kiuj venos al ni; sed vi enkolektu vinon kaj
somerajn fruktojn kaj oleon kaj metu en viajn vazojn,
kaj restu en viaj urboj, kiujn vi okupis. 11 Ankaŭ ĉiuj
Judoj, kiuj estis ĉe la Moabidoj, ĉe la Amonidoj, ĉe
la Edomidoj, kaj en ĉiuj landoj, aŭdis, ke la reĝo de
Babel restigis parton de la Judoj, kaj ke li starigis
kiel reganton super ili Gedaljan, filon de Aĥikam, filo
de Ŝafan. 12 Kaj ĉiuj tiuj Judoj revenis de ĉiuj lokoj,
kien ili estis dispelitaj, kaj venis en la landon Judan
al Gedalja en Micpan, kaj ili enkolektis tre multe da
vino kaj da someraj fruktoj. 13 Sed Joĥanan, filo de
Kareaĥ, kaj ĉiuj militestroj, kiuj estis sur la kampo,
venis al Gedalja en Micpan. 14 Kaj ili diris al li: Ĉu vi
scias, ke Baalis, reĝo de la Amonidoj, sendis Iŝmaelon,
filon de Netanja, por ke li mortigu vin? Sed Gedalja,
filo de Aĥikam, ne kredis al ili. 15 Tiam Joĥanan, filo
de Kareaĥ, diris sekrete al Gedalja en Micpa jene:
Permesu, ke mi iru kaj mortigu Iŝmaelon, filon de
Netanja, kaj neniu tion scios; kial li vin mortigu, ke
ĉiuj Judoj, kiuj kolektiĝis al vi, diskuru, kaj la restaĵo
de la Judoj pereu? 16 Sed Gedalja, filo de Aĥikam, diris
al Joĥanan, filo de Kareaĥ: Ne faru tion, ĉar malveron
vi parolas pri Iŝmael.

41 En la sepa monato Iŝmael, filo de Netanja, filo de
Eliŝama, el la reĝa idaro, unu el la eminentuloj
de la reĝo, kaj kun li dek viroj, venis al Gedalja, filo
de Aĥikam, en Micpan, kaj ili kune tie manĝis en
Micpa. 2 Kaj leviĝis Iŝmael, filo de Netanja, kaj la
dek viroj, kiuj estis kun li, kaj frapis Gedaljan, filon
de Aĥikam, filo de Ŝafan, per glavo, kaj mortigis lin,
kiun la reĝo de Babel starigis kiel reganton super la
lando. 3 Kaj ĉiujn Judojn, kiuj estis kun li, Gedalja, en
Micpa, kaj la Ĥaldeojn, kiuj tie troviĝis, la militistojn,
Iŝmael mortigis. 4 En la dua tago post la mortigo de
Gedalja, kiam neniu ankoraŭ sciis pri tio, 5 venis viroj
el Ŝeĥem, el Ŝilo, kaj el Samario, okdek homoj, kun
razitaj barboj kaj disŝiritaj vestoj, kun tranĉoj sur la
korpo, kaj en iliaj manoj estis donacoj kaj olibano, por
alporti ilin en la domon de la Eternulo. 6 Kaj Iŝmael,
filo de Netanja, eliris al ili renkonte el Micpa, irante
kaj plorante; kaj kiam li atingis ilin, li diris al ili: Iru
al Gedalja, filo de Aĥikam. 7 Sed kiam ili venis en la
mezon de la urbo, Iŝmael, filo de Netanja, kune kun la
homoj, kiuj estis kun li, buĉis ilin kaj ĵetis en kavon. 8
Tamen troviĝis inter ili dek homoj, kiuj diris al Iŝmael:
Ne mortigu nin, ĉar ni havas sur la kampo abundajn
provizojn da tritiko, hordeo, oleo, kaj mielo. Kaj li
haltis, kaj ne mortigis ilin kune kun iliaj fratoj. 9 La
kavo, en kiun Iŝmael ĵetis ĉiujn kadavrojn de la homoj,
kiujn li mortigis samtempe kiel Gedaljan, estis tiu,
kiun faris la reĝo Asa kontraŭ Baaŝa, reĝo de Izrael;
ĝin Iŝmael, filo de Netanja, plenigis per mortigitoj. 10
Kaj Iŝmael kaptis la tutan restaĵon de la popolo, kiu

estis en Micpa, la reĝidinojn, kaj la tutan popolon, kiu
restis en Micpa, kaj super kiu Nebuzaradan, la estro de
la korpogardistoj, estrigis Gedaljan, filon de Aĥikam;
ilin kaptis Iŝmael, filo de Netanja, kaj li pretiĝis, por
transiri al la Amonidoj. 11 Sed Joĥanan, filo de Kareaĥ,
kaj ĉiuj militestroj, kiuj estis kun li, aŭdis pri la tuta
malbono, kiun faris Iŝmael, filo de Netanja; 12 kaj ili
prenis ĉiujn virojn, kaj iris, por batali kontraŭ Iŝmael,
filo de Netanja; kaj ili trovis lin ĉe la granda akvo, kiu
estas en Gibeon. 13 Kiam la tuta popolo, kiu estis ĉe
Iŝmael, ekvidis Joĥananon, filon de Kareaĥ, kaj ĉiujn
militestrojn, kiuj estis kun li, ĝi ekĝojis. 14 Kaj la tuta
popolo, kiun Iŝmael forkondukis el Micpa, deturnis
sin, kaj iris al Joĥanan, filo de Kareaĥ. 15 Sed Iŝmael,
filo de Netanja, forkuris de Joĥanan kun ok homoj
kaj iris al la Amonidoj. 16 Joĥanan, filo de Kareaĥ,
kaj ĉiuj militestroj, kiuj estis kun li, prenis la tutan
restaĵon de la popolo, kiun li revenigis de Iŝmael,
filo de Netanja, el Micpa, post kiam ĉi tiu mortigis
Gedaljan, filon de Aĥikam: virojn, militistojn, virinojn,
infanojn, kaj eŭnukojn, kiujn li revenigis el Gibeon.
17 Kaj ili iris kaj haltis ĉe la gastejo Kimham, apud
Bet-Leĥem, por direkti sin al Egiptujo, 18 for de la
Ĥaldeoj; ĉar ili timis ilin pro tio, ke Iŝmael, filo de
Netanja, mortigis Gedaljan, filon de Aĥikam, kiun la
reĝo de Babel estrigis super la lando.

42 Kaj aliris ĉiuj militestroj, kaj Joĥanan, filo de
Kareaĥ, kaj Jezanja, filo de Hoŝaja, kaj la tuta
popolo, de la malgrandaj ĝis la grandaj, 2 kaj diris
al la profeto Jeremia: Ni humile petegas vin, preĝu
por ni al la Eternulo, via Dio, por ĉi tiu tuta restaĵo;
ĉar el multaj ni restis malmultaj, kiel viaj okuloj
nin vidas. 3 Kaj la Eternulo, via Dio, sciigu al ni la
vojon, kiun ni devas iri, kaj kion ni devas fari. 4 Kaj la
profeto Jeremia diris al ili: Mi aŭdis; jen mi preĝos al
la Eternulo, via Dio, konforme al viaj vortoj, kaj ĉion,
kion la Eternulo respondos al vi, mi raportos al vi; mi
nenion kaŝos antaŭ vi. 5 Kaj ili diris al Jeremia: La
Eternulo estu inter ni atestanto vera kaj fidela, ke ni
agos konforme al ĉio, kun kio la Eternulo, via Dio,
sendos vin al ni; 6 ĉu estos bone, ĉu estos malbone,
ni aŭskultos la voĉon de la Eternulo, nia Dio, al kiu
ni vin sendas, por ke estu al ni bone, se ni aŭskultos
la voĉon de la Eternulo, nia Dio. 7 Post dek tagoj
aperis la vorto de la Eternulo al Jeremia; 8 kaj li vokis
Joĥananon, filon de Kareaĥ, kaj ĉiujn militestrojn, kiuj
estis kun li, kaj la tutan popolon, de la malgrandaj ĝis
la grandaj, 9 kaj diris al ili: Tiele diras la Eternulo,
Dio de Izrael, al kiu vi min sendis, por faligi vian
petegon antaŭ Li: 10 Se vi restos en ĉi tiu lando, Mi
vin aranĝos kaj ne ruinigos, Mi vin plantos kaj ne
elradikigos; ĉar Mi pentas pri la malbono, kiun Mi
faris al vi. 11 Ne timu la reĝon de Babel, kiun vi nun
timas; ne timu lin, diras la Eternulo, ĉar Mi estas kun
vi, por helpi vin kaj por savi vin el lia mano. 12 Mi
estos favorkora al vi, ke li vin kompatu kaj vin loĝigu
sur via tero. 13 Sed se vi diros: Ni ne volas loĝi en ĉi
tiu lando, kaj vi ne obeos la voĉon de la Eternulo, via
Dio, 14 dirante: Ne, ni iros en la landon Egiptan, kie
ni ne vidos militon kaj ne aŭdos sonon de trumpeto
kaj ne malsatos koncerne panon, kaj tie ni restos: 15
tiam aŭskultu la vorton de la Eternulo, ho restaĵo de
Jehuda: tiele diras la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael:
Se vi turnos vian vizaĝon, por iri en Egiptujon, kaj vi
iros, por tie ekloĝi: 16 tiam la glavo, kiun vi timas,
atingos vin tie, en la lando Egipta, kaj la malsato, pri
kiu vi zorgas, persekutos vin tie en Egiptujo, kaj tie vi
mortos. 17 Tiamaniere ĉiuj homoj, kiuj turnis sian
vizaĝon, por iri en Egiptujon, por tie ekloĝi, mortos
de glavo, de malsato, kaj de pesto, kaj neniu el ili
restos, nek forsaviĝos de la malbono, kiun Mi venigos
sur ilin. 18 Ĉar tiele diras la Eternulo Cebaot, Dio de
Izrael: Kiel elverŝiĝis Mia kolero kaj indigno sur la
loĝantojn de Jerusalem, tiel Mia kolero elverŝiĝos sur
vin, kiam vi venos en Egiptujon, kaj vi fariĝos objekto
de ĵuro, de teruro, de malbeno, kaj de honto, kaj vi ne
plu vidos ĉi tiun lokon. 19 Pri vi, ho restaĵo de Jehuda,
la Eternulo parolis: Ne iru en Egiptujon; sciu, ke Mi
avertis vin hodiaŭ. 20 Vi fariĝis kulpaj kontraŭ viaj
propraj animoj; ĉar vi sendis min al la Eternulo, via
Dio, dirante: Preĝu por ni al la Eternulo, nia Dio, kaj
ĉion, kion diros la Eternulo, nia Dio, sciigu al ni, por
ke ni tion faru. 21 Kaj mi sciigis al vi hodiaŭ, sed vi ne
aŭskultis la voĉon de la Eternulo, via Dio, nek ĉion,
kun kio Li sendis min al vi; 22 sciu do, ke vi mortos de
glavo, de malsato, kaj de pesto, sur la loko, kien vi
volas iri, por tie ekloĝi.

43 Kiam Jeremia finis antaŭ la tuta popolo la
raportadon pri ĉiuj vortoj de la Eternulo, ilia Dio,
pri ĉiuj vortoj, kun kiuj la Eternulo, ilia Dio, sendis
lin al ili, 2 tiam Azarja, filo de Hoŝaja, kaj Joĥanan,
filo de Kareaĥ, kaj ĉiuj malhumilaj homoj diris al

Jeremia: Malveron vi parolas; la Eternulo, nia Dio,
ne sendis vin, por diri: Ne iru en Egiptujon, por tie
ekloĝi; 3 sed nur Baruĥ, filo de Nerija, instigas vin
kontraŭ ni, por transdoni nin en la manojn de la
Ĥaldeoj, por ke ili mortigu nin aŭ transloĝigu nin
en Babelon. 4 Tiamaniere Joĥanan, filo de Kareaĥ,
kaj ĉiuj militestroj, kaj la tuta popolo, ne obeis la
voĉon de la Eternulo, por resti en la lando Juda. 5 Kaj
Joĥanan, filo de Kareaĥ, kaj ĉiuj militestroj prenis la
tutan restaĵon de la Judoj, kiuj revenis el ĉiuj nacioj,
kien ili estis dispelitaj, por loĝi en la lando Juda: 6
la virojn, la virinojn, la infanojn, la reĝidinojn, kaj
ĉiujn, kiujn Nebuzaradan, estro de la korpogardistoj,
restigis kun Gedalja, filo de Aĥikam, filo de Ŝafan, kaj
la profeton Jeremia, kaj Baruĥon, filon de Nerija. 7 Kaj
ili iris en la landon Egiptan, ne obeante la voĉon de la
Eternulo, kaj venis ĝis Taĥpanĥes. 8 Kaj aperis vorto
de la Eternulo al Jeremia en Taĥpanĥes, dirante: 9
Prenu en vian manon grandajn ŝtonojn, kaj antaŭ
la okuloj de la Judaj viroj kaŝu ilin en la kalko en
la brikfarejo, kiu troviĝas ĉe la enirejo de la domo
de Faraono en Taĥpanĥes; 10 kaj diru al ili: Tiele
diras la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael: Jen Mi sendos,
kaj venigos Nebukadnecaron, reĝon de Babel, Mian
servanton, kaj Mi starigos lian tronon supre de ĉi
tiuj ŝtonoj, kiujn Mi kaŝis, kaj li starigos sur ili sian
tendon. 11 Kaj li venos, kaj frapos la landon Egiptan:
kiu estas destinita al la morto, tiu ricevos la morton;
kiu estas destinita al kaptiteco, tiu iros en kaptitecon;
kaj kiu estas destinita al glavo, tiun trafos glavo.
12 Kaj Mi ekbruligos fajron en la domoj de la dioj
de Egiptujo, kaj ĝi bruligos ilin kaj forkaptos. Kaj li
ĉirkaŭkovros sin per la havo de la lando Egipta, kiel
paŝtisto kovras sin per sia vesto, kaj li eliros el tie
bonstate. 13 Kaj li rompos la statuojn de la templo de
la suno en la lando Egipta, kaj la domojn de la dioj de
Egiptujo li forbruligos per fajro.

**44** Jen estas la vorto, kiu aperis al Jeremia pri ĉiuj
Judoj, kiuj loĝas en la lando Egipta, kiuj loĝas en
Migdol, en Taĥpanĥes, en Nof, kaj en la lando Patros:
2 Tiele diras la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael: Vi vidis
la tutan malbonon, kiun Mi venigis sur Jerusalemon
kaj sur ĉiujn urbojn de Judujo; jen ili estas nun
dezertaj, kaj neniu loĝas en ili, 3 pro iliaj malbonagoj,
kiujn ili faris, kolerigante Min, irante incensi kaj
servi al aliaj dioj, kiujn ne konis ili, nek vi, nek viaj
patroj. 4 Mi sendis al vi ĉiujn Miajn servantojn, la
profetojn, Mi konstante sendadis, dirante: Ne faru
tiun abomenindan aferon, kiun Mi malamas. 5 Sed ili
ne obeis, kaj ne alklinis sian orelon, por deturni sin
de siaj malbonagoj, por ne incensi al aliaj dioj. 6 Pro
tio elverŝiĝis Mia indigno kaj kolero, kaj ĝi ekbrulis en
la urboj de Judujo kaj sur la stratoj de Jerusalem, kaj
ili ruiniĝis kaj dezertiĝis, kiel oni nun vidas. 7 Kaj nun
tiele diras la Eternulo, Dio Cebaot, Dio de Izrael: Kial
vi faras grandan malbonon al viaj propraj animoj,
por ke ekstermiĝu ĉe vi viroj kaj virinoj, infanoj kaj
suĉinfanoj en Judujo, por ke nenio restu ĉe vi? 8 Kial
vi kolerigas Min per la faroj de viaj manoj, incensante
al aliaj dioj en la lando Egipta, kien vi venis, por tie
loĝi, por ke vi ekstermiĝu kaj por ke vi fariĝu objekto
de malbeno kaj de honto inter ĉiuj nacioj de la tero?
9 Ĉu vi forgesis la malbonaĵojn de viaj patroj kaj la
malbonaĵojn de la reĝoj de Judujo, la malbonaĵojn de
iliaj edzinoj, viajn malbonaĵojn, kaj la malbonaĵojn de
viaj edzinoj, kiujn ili faris en la lando Juda kaj sur la
stratoj de Jerusalem? 10 Ili ne humiliĝis ĝis la nuna
tago, ili ne timas kaj ne agas laŭ Mia instruo kaj laŭ
Miaj leĝoj, kiujn Mi donis al vi kaj al viaj patroj. 11 Tial
tiele diras la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael: Jen Mi
turnos Mian vizaĝon kontraŭ vin por malfeliĉo kaj por
ekstermi la tutan Judujon. 12 Kaj Mi prenos la restaĵon
de la Judoj, kiuj turnis sian vizaĝon, por iri en la
landon Egiptan, por tie ekloĝi, kaj ili ĉiuj ekstermiĝos
en la lando Egipta; ili falos de glavo, de malsato ili
ekstermiĝos, de la malgrandaj ĝis la grandaj; de glavo
kaj de malsato ili mortos, kaj ili fariĝos objekto de
ĵuro, de teruro, de malbeno, kaj de honto. 13 Kaj Mi
punos tiujn, kiuj loĝas en la lando Egipta, kiel Mi
punis Jerusalemon, per glavo, per malsato, kaj per
pesto. 14 Kaj neniu saviĝos nek restos el la restaĵo
de la Judoj, kiuj venis en la landon Egiptan, por loĝi
tie kelktempe kaj por poste reiri en la landon Judan,
kien ili sopiras per sia animo reveni kaj tie loĝi; ili ne
revenos, krom tiuj, kiuj forkuros. 15 Tiam respondis al
Jeremia ĉiuj viroj, kiuj sciis, ke iliaj edzinoj incensas al
aliaj dioj, kaj ĉiuj virinoj, kiuj staris en granda amaso,
kaj la tuta popolo, kiu loĝis en la lando Egipta, en
Patros; ili diris: 16 Tion, kion vi diris al ni en la nomo
de la Eternulo, ni ne obeos al vi; 17 sed ni faros ĉion
laŭ la vortoj, kiuj eliras el nia buŝo, ni incensos al
la reĝino de la ĉielo, ni verŝos al ŝi verŝoferojn, kiel
faris ni kaj niaj patroj, niaj reĝoj kaj niaj eminentuloj,

en la urboj de Judujo kaj sur la stratoj de Jerusalem;
tiam ni havis abundan panon, kaj estis al ni bone,
kaj malbonon ni ne vidis. 18 Sed de tiu tempo, kiam
ni ĉesis incensi al la reĝino de la ĉielo kaj verŝi al ŝi
verŝoferojn, ĉio mankas al ni, kaj ni pereas de glavo
kaj de malsato. 19 Kaj kiam ni incensas al la reĝino
de la ĉielo kaj verŝas al ŝi verŝoferojn, ĉu sen la scio
de niaj edzoj ni faras al ŝi kukojn kun ŝia bildo kaj
verŝas al ŝi verŝoferojn? 20 Tiam Jeremia diris al la
tuta popolo, pri la viroj kaj virinoj, kaj pri ĉiuj el la
popolo, kiuj respondis al li: 21 Ĝuste tiun incensadon,
kiun vi faradis en la urboj de Judujo kaj sur la stratoj
de Jerusalem, vi kaj viaj patroj, viaj reĝoj kaj viaj
eminentuloj kaj la popolo de la lando — ĝuste tion la
Eternulo ja rememoris, kaj ĝi atingis Lian koron. 22
Kaj la Eternulo ne plu povis toleri viajn malbonajn
agojn, la abomenindaĵojn, kiujn vi faris; tial via lando
fariĝis dezerto, objekto de teruro kaj de malbeno, kaj
neniu loĝas en ĝi, kiel oni nun vidas. 23 Pro tio, ke
vi incensadis kaj pekadis antaŭ la Eternulo kaj ne
obeis la voĉon de la Eternulo kaj ne agadis laŭ Lia
instruo, laŭ Liaj leĝoj kaj ordonoj — pro tio trafis vin
tiu malbono, kiel vi nun vidas. 24 Kaj Jeremia diris al
la tuta popolo kaj al ĉiuj virinoj: Aŭskultu la vorton de
la Eternulo, ĉiuj Judoj, kiuj estas en la lando Egipta! 25
Tiele diras la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael: Vi kaj
viaj edzinoj parolis per via buŝo kaj plenumis per viaj
manoj tion, kion vi diris: Ni plenumos nian solenan
promeson, kiun ni faris, incensi al la reĝino de la
ĉielo kaj verŝi al ŝi verŝoferojn; vi efektive plenumas
viajn promesojn, kaj faras, kion vi promesis. 26 Tial
aŭskultu la vorton de la Eternulo, ĉiuj Judoj, kiuj
loĝas en la lando Egipta: Jen Mi ĵuris per Mia granda
nomo, diras la Eternulo, ke la buŝo de neniu Judo en
la tuta lando Egipta plu vokos Mian nomon, dirante:
Kiel vivas la Sinjoro, la Eternulo. 27 Jen Mi viglos
super ili por malbono, ne por bono; kaj ĉiuj Judoj,
kiuj estas en la lando Egipta, pereos de glavo kaj de
malsato, ĝis ili tute ekstermiĝos. 28 Nur malgranda
nombro da homoj, kiuj saviĝos de glavo, revenos el la
lando Egipta en la landon Judan; kaj la tuta restaĵo
de la Judoj, kiuj venis en la landon Egiptan, por tie
loĝi, ekscios, kies vorto plenumiĝas, Mia aŭ ilia. 29
Kaj jen estas por vi la pruvosigno, diras la Eternulo,
ke Mi punos vin sur ĉi tiu loko, por ke vi sciu, ke
plenumiĝos Miaj vortoj sur vi por malbono: 30 tiele
diras la Eternulo: Jen Mi transdonos Faraonon Ĥofran,
reĝon de Egiptujo, en la manojn de liaj malamikoj, kaj
en la manojn de tiuj, kiuj celas lian morton, kiel Mi
transdonis Cidkijan, reĝon de Judujo, en la manon
de Nebukadnecar, reĝo de Babel, lia malamiko kaj
celanto de lia morto.

**45** Jen estas la vorto, kiun la profeto Jeremia diris
al Baruĥ, filo de Nerija, kiam ĉi tiu skribis tiujn
vortojn en libron sub diktado de Jeremia, en la kvara
jaro de Jehojakim, filo de Joŝija, reĝo de Judujo: 2
Tiele diras la Eternulo, Dio de Izrael, pri vi, ho Baruĥ:
3 Vi diris: Ve al mi! ĉar la Eternulo aldonis malĝojon
al mia suferado; mi laciĝis de mia ĝemado, kaj mi
ne trovas ripozon. 4 Tiele diru al li: Tiele diras la
Eternulo: Jen tion, kion Mi konstruis, Mi detruas, kaj
kion Mi plantis, tion Mi elradikigas, ĉi tiun tutan Mian
landon; 5 kaj vi postulas por vi grandaĵon! Ne postulu;
ĉar jen Mi venigos malbonon sur ĉiun karnon, diras la
Eternulo, sed al vi Mi donos vian animon kiel akiron
sur ĉiuj lokoj, kien vi iros.

**46** Jen estas la vorto de la Eternulo, kiu aperis al
la profeto Jeremia pri la nacioj: 2 Pri Egiptujo,
pri la militistaro de Faraono Neĥo, reĝo de Egiptujo,
kiu estis ĉe la rivero Eŭfrato en Karkemiŝ, kaj kiun
venkobatis Nebukadnecar, reĝo de Babel, en la kvara
jaro de Jehojakim, filo de Joŝija, reĝo de Judujo: 3
Pretigu ŝildon kaj kirason, kaj iru en batalon. 4 Jungu
la ĉevalojn kaj surĉevaligu la rajdistojn, stariĝu en
kaskoj, akrigu la lancojn, surmetu sur vin armaĵojn. 5
Kial Mi vidas, ke ili ektimis kaj kuras malantaŭen?
iliaj herooj estas frapitaj, kaj forkuras rapide, ne
deturnante sin; teruro estas ĉirkaŭe, diras la Eternulo.
6 Ne forkuros la rapidpiedulo, ne forsaviĝos la heroo;
norde, ĉe la rivero Eŭfrato, ili falpuŝiĝos kaj falos.
7 Kiu estas tiu, kiu leviĝas kiel Nilo kaj kies akvo
ondiĝas kiel torentoj? 8 Egiptujo leviĝas kiel Nilo, kaj
kiel torentoj, en kiuj ondiĝas la akvo; kaj ĝi diras:
Leviĝante, mi kovros la teron, mi pereigos urbon
kun ĝiaj loĝantoj. 9 Leviĝu sur la ĉevalojn, kaj kuru
rapide sur la ĉaroj; eliru la herooj, la Etiopoj kaj la
Putidoj, tenantaj ŝildon, kaj la Ludidoj, tenantaj kaj
streĉantaj pafarkon. 10 Kaj tiu tago estos ĉe la Sinjoro,
la Eternulo Cebaot, tago de venĝo, por venĝi al Liaj
malamikoj; kaj la glavo manĝegos kaj satiĝos kaj
ebriiĝos de ilia sango; ĉar buĉofero estos al la Sinjoro,
la Eternulo Cebaot, en la lando norda, ĉe la rivero
Eŭfrato. 11 Iru en Gileadon kaj prenu balzamon, ho

virga filino de Egiptujo; vane vi multigas la kuracilojn;
ne ekzistas por vi resaniĝo. 12 La nacioj aŭdis vian
malhonoron, kaj via plorado plenigis la teron; ĉar
fortulo falpuŝiĝis kontraŭ fortulo, kaj ambaŭ kune
falis. 13 Jen estas la vorto, kiun la Eternulo diris al la
profeto Jeremia pri la veno de Nebukadnecar, reĝo
de Babel, por frapi la landon Egiptan: 14 Sciigu en
Egiptujo, proklamu en Migdol, proklamu en Nof kaj
en Taĥpanĥes, diru: Stariĝu kaj pretiĝu, ĉar la glavo
ekstermas vian ĉirkaŭaĵon. 15 Kial estas forpuŝita via
fortulo, ne povis stari? ĉar la Eternulo lin renversis.
16 Li multigis la falpuŝiĝantojn; falis unu sur la alian;
kaj ili diras: Leviĝu, ni reiru al nia popolo kaj al la
lando de nia naskiĝo, for de la glavo de la tirano.
17 Oni kriis tie: Faraono, reĝo de Egiptujo, estas nur
bruo; li preterlasis la difinitan tempon. 18 Kiel Mi
vivas, diras la Reĝo, kies nomo estas Eternulo Cebaot,
li venos kiel Tabor inter la montoj kaj kiel Karmel ĉe
la maro. 19 Pretigu al vi ĉion, kio estas necesa por
elmigro, ho loĝantino, filino de Egiptujo; ĉar Nof estos
ruinigita kaj dezertigita, ke neniu en ĝi loĝos. 20 Tre
bela bovidino estas Egiptujo; sed de nordo venas jam
la buĉonto. 21 Ankaŭ ĝiaj dungitoj interne de ĝi estas
kiel bone nutritaj bovidoj; sed ili ankaŭ turnis sin
malantaŭen, kune forkuris, ne povis kontraŭstari; ĉar
la tago de ilia malfeliĉo venis sur ilin, la tempo de
ilia puno. 22 Ĝia voĉo sonos kiel voĉo de serpento;
ĉar ili iros kun militistaro, kaj kun hakiloj ili venos
al ĝi, kiel lignohakistoj. 23 Ili elhakos ĝian arbaron,
diras la Eternulo, kvankam ĝi estas nekalkulebla; ĉar
ili estas pli multenombraj ol akridoj, kaj oni ne povas
ilin kalkuli. 24 Hontigita estas la filino de Egiptujo,
transdonita en la manojn de norda popolo. 25 La
Eternulo Cebaot, Dio de Izrael, diras: Jen Mi punvizitos
Amonon en No, kaj Faraonon, kaj Egiptujon kaj ĝiajn
diojn kaj ĝiajn reĝojn, Faraonon mem, kaj tiujn, kiuj
fidas lin. 26 Kaj Mi transdonos ilin en la manojn de
tiuj, kiuj celas ilian morton, kaj en la manojn de
Nebukadnecar, reĝo de Babel, kaj en la manojn de liaj
servantoj; sed poste ĝi estos loĝata, kiel en la tempo
antaŭa, diras la Eternulo. 27 Sed vi ne timu, ho Mia
servanto Jakob, kaj ne tremu, ho Izrael; ĉar jen Mi
savos vin el malproksime kaj vian idaron el la lando
de ilia kaptiteco, kaj Jakob revenos kaj vivos trankvile
kaj pace, kaj neniu lin timigos. 28 Vi ne timu, ho Mia
servanto Jakob, diras la Eternulo, ĉar Mi estas kun
vi; ĉar Mi ekstermos ĉiujn popolojn, inter kiujn Mi
dispelis vin, sed vin Mi ne ekstermos; Mi nur punos
vin modere, por ke Mi ne lasu vin tute sen puno.

47 Jen estas la vorto de la Eternulo, kiu aperis al la
profeto Jeremia pri la Filiŝtoj, antaŭ ol Faraono
venkobatis Gazan: 2 Tiele diras la Eternulo: Jen venos
akvo de norde, kaj ĝi fariĝos inundanta torento, kaj ĝi
inundos la landon, kaj ĉion, kio estas en ĝi, la urbon
kaj ĝiajn loĝantojn; ekkrios la homoj, kaj ekploregos
ĉiuj loĝantoj de la lando. 3 Pro la sonado de la hufoj
de la fortaj ĉevaloj, pro la bruo de la ĉaroj, pro la
bruego de la radoj la patroj ne atentos siajn infanojn,
senforte malleviĝos iliaj manoj; 4 pro la tago, kiu
venos, kiam oni prirabos ĉiujn Filiŝtojn, ekstermos
ĉe Tiro kaj Cidon ĉiujn restintajn helpantojn; ĉar la
Eternulo ruinigos la Filiŝtojn, la restaĵon de la insulo
Kaftor. 5 Kalveco trafos Gazan, pereos Aŝkelon kaj
la restaĵo de ilia valo. Kiel longe ankoraŭ vi faros al
vi tranĉojn? 6 Ho glavo de la Eternulo, kiel longe vi
ne kvietiĝos? eniru en vian ingon, haltu kaj silentu.
7 Sed kiel vi povas kvietiĝi? la Eternulo donis al ĝi
ordonon kontraŭ Aŝkelon kaj kontraŭ la bordo de la
maro; tien Li destinis ĝin.

48 Pri Moab: Tiele diras la Eternulo Cebaot, Dio
de Izrael: Ve al Nebo! ĉar ĝi estas ruinigita;
hontigita kaj venkoprenita estas Kirjataim; hontigita
kaj tremigita estas la fortikaĵo. 2 Jam ne ekzistas
la gloro de Moab; en Ĥeŝbon oni intencas kontraŭ
ĝi malbonon, dirante: Ni iru, kaj ni ekstermu ĝin,
ke ĝi ne plu estu popolo. Ankaŭ vi, ho Madmen,
eksilentu; vin persekutos glavo. 3 Kriadon oni aŭdas
de Ĥoronaim, tie estas ruinigado kaj granda malfeliĉo.
4 Disbatita estas Moab; ĝiaj infanoj laŭte krias. 5
Kiuj supreniras al Luĥit, tiuj iras kun plorado; ĉe la
malsuprenirado de Ĥoronaim la malamikoj aŭdas
kriadon de malfeliĉo. 6 Forkuru, savu vian vivon, kaj
estu kiel seknudiĝinta arbo en la dezerto. 7 Ĉar vi
fidis viajn faritaĵojn kaj viajn trezorojn, vi ankaŭ estos
venkoprenita; kaj Kemoŝ iros en kaptitecon kune
kun siaj pastroj kaj eminentuloj. 8 Venos ruiniganto
en ĉiun urbon, neniu urbo saviĝos; pereos la valo
kaj dezertiĝos la ebenaĵo, kiel diris la Eternulo. 9
Donu flugilojn al Moab, ĉar li devas forflugi; liaj urboj
dezertiĝos tiel, ke neniu en ili loĝos. 10 Malbenita estu
tiu, kiu plenumas malĝuste la faron de la Eternulo, kaj
malbenita estu tiu, kiu detenas sian glavon de sango.
11 De sia juneco Moab havis trankvilecon kaj ripozadis

sur sia feĉo, li ne estis transverŝata el unu vazo en
alian, kaj en kaptitecon li ne iris; tial lia gusto restis
en li kaj lia odoro ne ŝanĝiĝis. 12 Tial jen venos tempo,
diras la Eternulo, kiam Mi sendos al li verŝistojn, kaj
ili verŝos lin, malplenigos liajn vazojn, kaj disrompos
liajn kruĉojn. 13 Kaj Moab estos hontigita pro Kemoŝ,
kiel la domo de Izrael estis hontigita pro Bet-El, kiun
ili fidis. 14 Kiel vi povas diri: Ni estas herooj kaj
kapabluloj por la milito? 15 Ruinigita estas Moab, liaj
urboj falis, kaj liaj plej bravaj junuloj iris al buĉo, diras
al Reĝo, kies nomo estas Eternulo Cebaot. 16 Baldaŭ
venos pereo al Moab, kaj lia malfeliĉo tre rapidas. 17
Bedaŭru lin ĉiuj liaj ĉirkaŭantoj, kaj ĉiuj, kiuj konas
lian nomon, diru: Kiele disrompiĝis la forta vergo, la
belega bastono! 18 Iru malsupren de via majesto, sidu
en senakva loko, ho loĝantino, filino de Dibon; ĉar la
ruiniganto de Moab elpaŝis kontraŭ vin kaj detruis
viajn fortikaĵojn. 19 Staru ĉe la vojo kaj rigardu, ho
loĝantino de Aroer; demandu la forkuranton kaj la
forsaviĝanton, kaj diru: Kio fariĝis? 20 Hontigita estas
Moab, ĉar li estas frapita; ploru kaj kriu, sciigu en
Arnon, ke Moab estas ruinigita. 21 Juĝo venis kontraŭ
la lando de la ebenaĵo, kontraŭ Ĥolon, Jahac, kaj
Mefaat, 22 kontraŭ Dibon, Nebo, kaj Bet-Diblataim,
23 kontraŭ Kirjataim, Bet-Gamul, kaj Bet-Meon, 24
kontraŭ Keriot kaj Bocra, kaj kontraŭ ĉiuj urboj de la
lando de Moab, la malproksimaj kaj la proksimaj. 25
Dehakita estas la korno de Moab, kaj lia brako estas
rompita, diras la Eternulo. 26 Ebriigu lin, ĉar li leviĝis
kontraŭ la Eternulo; Moab plaŭdos en sia vomaĵo,
kaj li mem estos objekto de mokado. 27 Ĉu vi ne
mokis Izraelon? ĉu oni trovis lin inter ŝtelistoj, ke
ĉiufoje, kiam vi parolas pri li, vi balancas la kapon? 28
Forlasu la urbojn kaj ekloĝu sur roko, ho loĝantoj de
Moab, kaj fariĝu kiel kolomboj, kiuj nestas en truoj de
kavernoj. 29 Ni aŭdis pri la fiereco de Moab, granda
fiereco, pri lia malmodesteco, fiereco, aroganteco,
kaj pri la malhumileco de lia koro. 30 Mi konas, diras
la Eternulo, lian koleremecon, la nesincerecon de
liaj vortoj kaj la nesincerecon de liaj agoj. 31 Tial Mi
devas plori pri Moab, ĝemi pri ĉiuj Moabidoj, priplori
la loĝantojn de Kir-Ĥeres. 32 Per pli ol la plorado de
Jazer Mi ploros pri vi, ho vinberĝardeno de Sibma; viaj
branĉoj etendiĝis trans la maron, atingis la maron de
Jazer; rabisto atakis viajn somerajn fruktojn kaj vian
rikolton. 33 Foriĝis ĝojo kaj gajeco de la fruktodona
kampo kaj de la lando de Moab; Mi malaperigis
vinon en la vinpremejoj, oni ne premos tie kun ĝojo
vinon, triumfaj kantoj ne plu sonos. 34 Pro la kriado,
kiu aŭdiĝas de Ĥeŝbon ĝis Eleale kaj ĝis Jahac, ili
laŭte ekploris de Coar ĝis Ĥoronaim kaj ĝis la tria
Eglat; ĉar ankaŭ la akvo de Nimrim sekmalaperis. 35
Mi ekstermos ĉe Moab, diras la Eternulo, ĉiun, kiu
supreniras sur altaĵon kaj incensas al siaj dioj. 36
Tial Mia koro ĝemas pri Moab kiel fluto, kaj pri la
loĝantoj de Kir-Ĥeres Mia koro ĝemas kiel fluto; ĉar
la abundaĵo, kiun ili akiris, pereis. 37 Ĉar ĉiu kapo
kalviĝis, kaj ĉiu barbo estas fortondita, sur ĉiuj manoj
estas tranĉoj, kaj sur la lumboj estas sakaĵo. 38 Sur
ĉiuj tegmentoj de Moab kaj sur liaj stratoj ĉie estas
plorado; ĉar Mi disrompis Moabon kiel senvaloran
vazon, diras la Eternulo. 39 Kiele disbatita li estas,
kiele ili ploregas! kiele Moab turnis sian nukon, estas
hontigita, kaj Moab fariĝis objekto de mokado kaj de
teruro por ĉiuj siaj ĉirkaŭantoj! 40 Ĉar tiele diras la
Eternulo: Jen li alflugos kiel aglo kaj etendos siajn
flugilojn super Moab. 41 Prenita estas Keriot, kaj la
fortikigitaj urboj estas kaptitaj; kaj la koro de la herooj
de Moab en tiu tago estos kiel la koro de virino dum la
doloroj de naskado. 42 Kaj Moab estos ekstermita, ke li
ne plu estos popolo, ĉar li leviĝis kontraŭ la Eternulo.
43 Teruro, kavo, kaj kaptilo trafos vin, ho loĝanto de
Moab, diras la Eternulo. 44 Kiu forkuros de la teruro,
tiu falos en la kavon; kaj kiu eliros el la kavo, tiu trafos
en kaptilon; ĉar Mi venigos sur lin, sur Moabon, la
jaron de lia puno, diras la Eternulo. 45 Sub la ombro
de Ĥeŝbon stariĝos tiuj, kiuj forkuros de la forto; sed
fajro eliros el Ĥeŝbon kaj flamo el la mezo de Siĥon,
kaj ĝi manĝegos la flankon de Moab kaj la verton de la
filoj malkvietaj. 46 Ve al vi, ho Moab! pereis la popolo
de Kemoŝ; ĉar viaj filoj estas prenitaj en kaptitecon
kaj viaj filinoj estas forkondukitaj. 47 Sed en la tempo
estonta Mi revenigos la kaptitojn de Moab, diras la
Eternulo. Ĝis ĉi tie estas la verdikto pri Moab.

49 Pri la Amonidoj: Tiele diras la Eternulo: Ĉu Izrael
ne havas filojn? ĉu li ne havas heredanton? kial
do Malkam heredis Gadon kaj lia popolo loĝas en
la urboj de ĉi tiu? 2 Tial jen venos tempo, diras la
Eternulo, kaj Mi eksonigos militan trumpetadon super
Raba de la Amonidoj; kaj ĝi fariĝos amaso da ruinoj,
kaj ĝiaj filinoj forbrulos en fajro, kaj Izrael ekposedos
siajn posedintojn, diras la Eternulo. 3 Ploregu, ho
Ĥeŝbon, ĉar Aj estas ruinigita. Kriu, ho filinoj de Raba,

zonu vin per sakaĵo, ploru kaj vagadu inter la bariloj;
ĉar Malkam iras en kaptitecon kune kun siaj pastroj
kaj eminentuloj. 4 Kial vi fanfaronas pri viaj valoj?
sangon fluigas via valo, ho filino malobeema, kiu
fidas siajn trezorojn, kaj diras: Kiu povas veni al mi?
5 Jen Mi venigos sur vin timon, diras la Sinjoro, la
Eternulo Cebaot, de ĉiuj viaj ĉirkaŭaĵoj; kaj vi estos
dispelitaj ĉiu aparte, kaj neniu kolektos la vagantojn. 6
Tamen poste Mi revenigos la forkaptitajn Amonidojn,
diras la Eternulo. 7 Pri Edom: Tiele diras la Eternulo
Cebaot: Ĉu jam ne ekzistas saĝo en Teman? ĉu la filoj
jam ne havas konsilon? ĉu ilia saĝeco malaperis? 8
Forkuras, turnis sian dorson, kaj profunde sin kaŝas la
loĝantoj de Dedan; ĉar malfeliĉon de Esav Mi venigis
sur lin, la tempon de lia puno. 9 Kiam venos al vi
vinberkolektantoj, ili ne restigos forgesitajn berojn; se
venos ŝtelistoj en la nokto, ili rabos plenan kvanton.
10 Ĉar Mi nudigis Esavon, Mi malkaŝis liajn sekretajn
rifuĝejojn, por ke li ne povu sin kaŝi; ekstermitaj estas
lia idaro, liaj fratoj, kaj liaj najbaroj, kaj li jam ne
ekzistas. 11 Restigu viajn orfojn, Mi konservos ilian
vivon; kaj viaj vidvinoj fidu Min. 12 Ĉar tiele diras la
Eternulo: Jen tiuj, kiuj ne meritis trinki la pokalon,
tamen ĝin trinkos; ĉu vi do povas resti nepunita? vi ne
restos nepunita, sed vi nepre trinkos. 13 Ĉar Mi ĵuris
per Mi, diras la Eternulo, ke Bocra fariĝos objekto
de teruro, honto, ruinigo, kaj malbeno; kaj ĉiuj ĝiaj
urboj fariĝos ruinoj por eterne. 14 Diron mi aŭdis
de la Eternulo, kaj kuriero estas sendita al la nacioj:
Kolektiĝu kaj iru kontraŭ ĝin, kaj leviĝu por batalo.
15 Ĉar jen Mi faris vin malgranda inter la nacioj,
malestimata inter la homoj. 16 Via malhumileco kaj
la fiereco de via koro trompis vin, kiu loĝas en la
fendegoj de la rokoj kaj okupas suprojn de montoj;
sed se vi eĉ aranĝus vian neston tiel alte, kiel aglo,
eĉ de tie Mi ĵetos vin malsupren, diras la Eternulo.
17 Edom fariĝos objekto de teruro; ĉiu, kiu pasos
preter li, miros kaj fajfos pri ĉiuj liaj vundoj. 18
Kiel renversitaj estas Sodom kaj Gomora kaj iliaj
najbarlokoj, diras la Eternulo, tiel ankaŭ tie neniu
restos, neniu homido tie loĝos. 19 Jen kiel leono li
supreniras de la majesta Jordan kontraŭ la fortikan
loĝejon; ĉar Mi rapide forpelos ilin de tie, kaj Mi
estrigos tie tiun, kiu estas elektita. Ĉar kiu estas
simila al Mi? kiu donos al Mi decidojn? kiu estas
la paŝtisto, kiu povas kontraŭstari al Mi? 20 Tial
aŭskultu la decidon de la Eternulo, kiun Li decidis
pri Edom, kaj Liajn intencojn, kiujn Li havas pri la
loĝantoj de Teman: la knaboj-paŝtistoj ilin fortrenos
kaj detruos super ili ilian loĝejon. 21 De la bruo de ilia
falo ektremos la tero, ilian kriadon oni aŭdos ĉe la
Ruĝa Maro. 22 Jen li leviĝos kiel aglo, ekflugos kaj
etendos siajn flugilojn super Bocra; kaj la koro de la
herooj de Edom en tiu tago estos kiel la koro de virino
ĉe la naskodoloroj. 23 Pri Damasko: Hontigitaj estas
Ĥamat kaj Arpad, ĉar, aŭdinte malbonan sciigon, ili
senkuraĝiĝis; ĉe la maro ili tiel ektremis, ke ili ne
povas trankviliĝi. 24 Damasko senkuraĝiĝis, turnis sin,
por forkuri; tremo atakis ĝin, doloro kaj turmentoj ĝin
kaptis, kiel naskantinon. 25 Kial ne estas riparita la
glora urbo, la gaja urbo? 26 Tial ĝiaj junuloj falos sur
ĝiaj stratoj, kaj ĉiuj militistoj pereos en tiu tago, diras
la Eternulo Cebaot. 27 Kaj Mi ekbruligos fajron sur la
murego de Damasko, kaj ĝi ekstermos la palacojn de
Ben-Hadad. 28 Pri Kedar, kaj pri la regnoj de Ĥacor,
kiujn venkobatis Nebukadnecar, reĝo de Babel: Tiele
diras la Eternulo: Leviĝu, iru kontraŭ Kedaron, kaj
ruinigu la filojn de la oriento. 29 Iliaj tendoj kaj ŝafaroj
estos prenitaj; iliajn tapiŝojn kaj ĉiujn iliajn vazojn
kaj iliajn kamelojn oni forprenos, kaj oni kriados al
ili: Teruro ĉirkaŭe. 30 Forkuru, foriĝu rapide, kaŝu
vin profunde, ho loĝantoj de Ĥacor, diras la Eternulo;
ĉar Nebukadnecar, reĝo de Babel, faras pri vi decidon
kaj havas intencon kontraŭ vi. 31 Leviĝu, iru kontraŭ
popolon trankvilan, kiu sidas en sendanĝereco, diras
la Eternulo; ĝi ne havas pordojn nek riglilojn, ili vivas
izolite. 32 Kaj iliaj kameloj estos forrabitaj, kaj la multo
de iliaj brutoj fariĝos rabakiro; kaj Mi dispelos ilin al
ĉiuj ventoj, ilin, kiuj tondas la harojn sur la tempioj,
kaj de ĉiuj flankoj Mi venigos ilian malfeliĉon, diras la
Eternulo. 33 Kaj Ĥacor fariĝos loĝejo de ŝakaloj, eterna
dezerto; neniu tie restos, kaj neniu homido tie loĝos.
34 Jen estas la vorto de la Eternulo, kiu aperis al la
profeto Jeremia pri Elam, en la komenco de la reĝado
de Cidkija, reĝo de Judujo: 35 Tiele diras la Eternulo
Cebaot: Jen Mi rompos la pafarkon de Elam, ilian ĉefan
forton. 36 Kaj Mi venigos sur Elamon kvar ventojn de
la kvar finoj de la ĉielo, kaj Mi dispelos ilin al ĉiuj
tiuj ventoj; kaj ne ekzistos popolo, al kiu ne venus
la dispelitoj el Elam. 37 Kaj Mi senkuraĝigos Elamon
antaŭ iliaj malamikoj, kaj antaŭ tiuj, kiuj celas ilian
morton; kaj Mi venigos sur ilin malbonon, la flamon
de Mia kolero, diras la Eternulo, kaj Mi persekutos ilin
per la glavo, ĝis Mi ekstermos ilin. 38 Kaj Mi starigos

Mian tronon en Elam, kaj Mi pereigos tie la reĝon kaj
la eminentulojn, diras la Eternulo. 39 Tamen en la
tempo estonta Mi revenigos la forkaptitojn de Elam,
diras la Eternulo.

**50** Jen estas la vorto, kiun la Eternulo diris per la
profeto Jeremia pri Babel kaj pri la lando de
la Ĥaldeoj: 2 Sciigu al la nacioj kaj proklamu, levu
standardon, proklamu, ne kaŝu, diru: Prenita estas
Babel, hontigita estas Bel, frakasita estas Merodaĥ,
hontigitaj estas ĝiaj idoloj, frakasitaj estas ĝiaj statuoj.
3 Ĉar eliris kontraŭ ĝin popolo el la nordo, kiu faros
ĝian landon dezerto, kaj ne plu estos loĝanto en ĝi: de
homo ĝis bruto ĉio foriĝos kaj foriros. 4 En tiuj tagoj
kaj en tiu tempo, diras la Eternulo, venos la idoj de
Izrael kune kun la idoj de Jehuda; ili iros kaj ploros,
kaj serĉos la Eternulon, sian Dion. 5 Pri la vojo al Cion
ili demandos, tien estos turnita ilia vizaĝo: Venu, ni
aliĝos al la Eternulo per interligo eterna, neforgesebla.
6 Mia popolo estis kiel erarvagantaj ŝafoj: ili paŝtistoj
delogis ilin, erarvagigis ilin sur la montoj; de monto
sur monteton ili vagis, ili forgesis sian ŝafejon. 7 Ĉiuj,
kiuj renkontis ilin, manĝis ilin; kaj iliaj malamikoj
diris: Ni ne estas kulpaj, ĉar ili pekis antaŭ la Eternulo,
la loĝejo de la vero, antaŭ la espero de iliaj patroj,
la Eternulo. 8 Kuru el Babel kaj eliru el la lando de
la Ĥaldeoj, kaj estu kiel virkaproj antaŭ la ŝafoj. 9
Ĉar jen Mi vekos kaj venigos sur Babelon amason
da grandaj popoloj el lando norda, kaj ili aranĝos
sin kontraŭ ĝi, kaj ĝi estos venkoprenita; iliaj sagoj,
kiel lerta heroo, ne revenas vane. 10 Kaj Ĥaldeujo
fariĝos militakiro; ĉiuj ĝiaj prirabantoj satiĝos, diras
la Eternulo. 11 Ĉar vi ĝojis, ĉar vi triumfis, ho rabintoj
de Mia heredaĵo, ĉar vi saltis, kiel bovidino sur herbo,
kaj blekis, kiel fortaj ĉevaloj, 12 tre hontigita estas
via patrino, mokata estas via naskintino; jen estas
la estonteco de la nacioj: dezerto, neloĝata tero,
kaj stepo. 13 De la kolero de la Eternulo ĝi fariĝos
neloĝata, kaj ĝi tuta fariĝos dezerta; ĉiu, kiu iros
preter Babel, miros kaj fajfos pri ĉiuj ĝiaj vundoj. 14
Pretigu vin kontraŭ Babel ĉirkaŭe, ĉiuj streĉantoj de
pafarkoj, pafu sur ĝin, ne domaĝu sagojn; ĉar ĝi pekis
antaŭ la Eternulo. 15 Triumfe kriu kontraŭ ĝi ĉirkaŭe;
malleviĝis ĝia mano, falis ĝia fundamento, detruiĝis
ĝiaj muregoj; ĉar tio estas venĝo de la Eternulo; venĝu
al ĝi; kiel ĝi agis, tiel agu kontraŭ ĝi. 16 Ekstermu
el Babel semanton kaj rikoltanton en la tempo de
rikoltado; de la glavo de la tirano ĉiu sin turnu al sia
popolo, kaj ĉiu forkuru en sian landon. 17 Izrael estas
kiel disĵetita ŝafaro; leonoj lin dispelis: la unua manĝis
lin la reĝo de Asirio, kaj ĉi tiu lasta, Nebukadnecar,
reĝo de Babel, rompis al li la ostojn. 18 Tial tiele
diras la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael: Jen Mi punos
la reĝon de Babel kaj lian landon, kiel Mi punis la
reĝon de Asirio. 19 Kaj Mi revenigos Izraelon en lian
loĝejon, kaj li paŝtiĝos sur Karmel kaj Baŝan, kaj sur
la monto de Efraim kaj en Gilead lia animo satiĝos.
20 En tiuj tagoj kaj en tiu tempo, diras la Eternulo,
oni serĉos malbonagon de Izrael, sed ĝi ne estos, kaj
pekon de Jehuda, sed ĝi ne troviĝos; ĉar Mi pardonos
al tiuj, kiujn Mi restigos. 21 Iru kontraŭ la landon de la
maldolĉigantoj, kontraŭ ĝin kaj kontraŭ la loĝantojn
de la punejo; ruinigu kaj ekstermu ĉion post ili, diras
la Eternulo, kaj faru ĉion tiel, kiel Mi ordonis al vi. 22
Bruo de batalo estas en la lando, kaj granda frakasado.
23 Kiele rompita kaj frakasita estas la martelo de la
tuta tero! kiele dezertiĝis Babel inter la nacioj! 24 Mi
starigis reton por vi, kaj vi estas kaptita, ho Babel,
antaŭ ol vi tion rimarkis; vi estas trovita kaj kaptita,
ĉar vi leviĝis kontraŭ la Eternulon. 25 La Eternulo
malfermis Sian trezorejon, kaj elprenis el tie la ilojn
de Sia kolero; ĉar ion por fari havas la Sinjoro, la
Eternulo Cebaot, en la lando de la Ĥaldeoj. 26 Iru
kontraŭ ĝin de plej malproksime, malfermu ĝiajn
grenejojn, piedpremu ĝin kiel amasaĵon, ekstermu ĝin,
ke nenio de ĝi restu. 27 Dishaku per glavo ĉiujn ĝiajn
bovojn; ili estu buĉataj. Ve al ili! ĉar venis ilia tago, la
tempo de ilia puno. 28 Aŭdiĝas voĉo de forkurantoj
kaj forsaviĝantoj el la lando Babela, por sciigi en Cion
pri la venĝo de la Eternulo, nia Dio, pri la venĝo pro
Lia templo. 29 Alvoku multajn kontraŭ Babelon, ĉiujn,
kiuj streĉas pafarkon; stariĝu tendare ĉirkaŭ ĝi, ke
neniu povu forsaviĝi el ĝi; repagu al ĝi laŭ ĝiaj agoj:
ĉion, kion ĝi faris, faru al ĝi; ĉar ĝi estis malhumila
kontraŭ la Eternulo, kontraŭ la Sanktulo de Izrael. 30
Pro tio ĝiaj junuloj falos sur ĝiaj stratoj, kaj ĉiuj ĝiaj
militistoj pereos en tiu tago, diras la Eternulo. 31 Jen
Mi estas kontraŭ vi, ho malhumilulo, diras la Sinjoro,
la Eternulo Cebaot; ĉar venis via tago, la tempo de
via puno. 32 Kaj la malhumilulo falpuŝiĝos kaj falos,
kaj neniu lin levos; kaj Mi ekbruligos fajron en liaj
urboj, kaj ĝi ekstermos ĉiujn liajn ĉirkaŭaĵojn. 33 Tiele
diras la Eternulo Cebaot: Turmentataj estas la idoj
de Izrael kune kun la idoj de Jehuda; kaj ĉiuj iliaj

kaptintoj forte ilin tenas, ne volas forliberigi ilin.
34 Sed ilia Liberiganto estas forta, Eternulo Cebaot
estas Lia nomo; Li defendos ilian aferon tiel, ke la tero
skuiĝos kaj la loĝantoj de Babel ektremos. 35 Glavo
falu sur la Ĥaldeojn, diras la Eternulo, sur la loĝantojn
de Babel, sur ĝiajn eminentulojn kaj saĝulojn; 36 glavo
sur la antaŭdiristojn, ke ili malsaĝiĝu; glavo sur ĝiajn
heroojn, ke ili senkuraĝiĝu; 37 glavo sur ĝiajn ĉevalojn
kaj sur ĝiajn ĉarojn, kaj sur ĉiujn diversgentajn
loĝantojn, kiuj estas en ĝi, ke ili fariĝu kiel virinoj;
glavo sur ĝiajn trezorojn, ke ili estu disrabitaj. 38
Sekeco trafu ĝiajn akvojn, ke ili malaperu; ĉar tio estas
lando de idoloj, kaj pri siaj monstroj ili fanfaronas. 39
Tial tie ekloĝos stepaj bestoj kaj ŝakaloj, kaj strutoj
en ĝi loĝos; ĝi neniam plu estos loĝata, kaj neniu
tie havos domon en ĉiuj venontaj generacioj. 40
Kiel Dio renversis Sodomon kaj Gomoran kaj iliajn
najbarlokojn, diras la Eternulo, tiel ankaŭ tie restos
neniu kaj loĝos neniu homido. 41 Jen venas popolo el
nordo, granda nacio kaj multe da reĝoj leviĝas de la
randoj de la tero. 42 Pafarkon kaj lancon ili tenas forte;
kruelaj ili estas kaj senkompataj; ilia voĉo bruas kiel
maro; sur ĉevaloj ili rajdas, armite por la batalo kiel
unu homo, kontraŭ vin, ho filino de Babel. 43 Aŭdis
la reĝo de Babel la sciigon pri ili, kaj senfortiĝis liaj
manoj; suferego atakis lin, doloro kiel ĉe naskantino.
44 Jen kiel leono li supreniras de la majesta Jordan
kontraŭ la fortikan loĝejon; ĉar Mi rapide forpelos ilin
de tie, kaj Mi estrigos tie tiun, kiu estas elektita. Ĉar
kiu estas simila al Mi? kiu donos al Mi decidojn? kaj
kiu estas la paŝtisto, kiu povas kontraŭstari al Mi? 45
Tial aŭskultu la decidon de la Eternulo, kiun Li decidis
pri Babel, kaj Liajn intencojn, kiujn Li havas pri la
lando de la Ĥaldeoj: la knaboj-paŝtistoj ilin fortrenos,
kaj detruos super ili ilian loĝejon. 46 De la famo pri la
preno de Babel ektremos la tero, kaj krio estos aŭdata
ĉe la nacioj.

**51** Tiele diras la Eternulo: Jen Mi vekos pereigan
venton kontraŭ Babelon, kaj kontraŭ ĝiajn
loĝantojn, kiuj leviĝis kontraŭ Min. 2 Kaj Mi sendos
ventumistojn kontraŭ Babelon, kaj ili ĝin disventumos,
kaj dezertigos ĝian landon; ĉar en la tago de la
malfeliĉo ili estos ĉirkaŭ ĝi ĉiuflanke. 3 La pafarkisto
streĉu sian pafarkon, kaj sin levu en sia kiraso;
ne kompatu ĝiajn junulojn, ekstermu ĝian tutan
militistaron. 4 Kaj falu mortigitoj en la lando de la
Ĥaldeoj, kaj trapikitoj sur iliaj stratoj. 5 Ĉar Izrael kaj
Jehuda ne estas vidvigitaj de sia Dio, de la Eternulo
Cebaot; ĉar ilia lando estas plena de kulpoj kontraŭ
la Sanktulo de Izrael. 6 Forkuru el interne de Babel,
kaj savu ĉiu sian animon, ke vi ne pereu pro ĝiaj
malbonagoj; ĉar tio estas tempo de venĝo por la
Eternulo, Li donas al ĝi repagon. 7 En la mano de la
Eternulo Babel estis ora kaliko, ebriiganta la tutan
teron: el ĝi trinkis vinon la nacioj, kaj tial ili freneziĝis.
8 Subite falis Babel kaj frakasiĝis; ploru pri ĝi, prenu
balzamon por ĝia vundo; eble ĝi saniĝos. 9 Ni kuracis
Babelon, sed ĝi ne saniĝis; lasu ĝin, kaj ni iru ĉiu en
sian landon; ĉar la juĝo kontraŭ ĝi atingis la ĉielon
kaj leviĝis ĝis la nuboj. 10 La Eternulo elaperigis nian
pravecon; venu, kaj ni rakontu en Cion la faron de
la Eternulo, nia Dio. 11 Akrigu la sagojn, pretigu la
ŝildojn! la Eternulo vekis la spiriton de la reĝoj de
Medujo, ĉar Lia intenco estas kontraŭ Babel, por
pereigi ĝin; ĉar tio estas venĝo de la Eternulo, venĝo
pro Lia templo. 12 Kontraŭ la muregojn de Babel
levu standardon, plifortigu la gardistaron, starigu
observistojn, pretigu embuskon; ĉar kiel la Eternulo
intencis, tiel Li faris tion, kion Li diris pri la loĝantoj
de Babel. 13 Ho vi, kiu loĝas ĉe granda akvo kaj havas
grandajn trezorojn! venis via fino, finiĝis via avideco.
14 La Eternulo Cebaot ĵuris per Sia animo: Mi plenigos
vin de homoj kiel de skaraboj, kaj ili eksonigos kontraŭ
vi triumfan kanton. 15 Li kreis la teron per Sia forto,
aranĝis la mondon per Sia saĝo, kaj per Sia prudento
etendis la ĉielon. 16 Kiam Li eksonigas Sian voĉon,
kolektiĝas multego da akvo en la ĉielo; Li levas la
nubojn de la randoj de la tero, Li aperigas fulmojn
inter la pluvo, kaj elirigas la venton el Siaj trezorejoj.
17 Malsaĝiĝis ĉiu homo kun sia sciado, per honto
kovriĝis ĉiu fandisto kun sia statuo; ĉar lia fanditaĵo
estas malveraĵo, ĝi ne havas en si spiriton. 18 Tio
estas vantaĵo, faro de eraro; kiam ili estos vizititaj, ili
pereos. 19 Ne simila al ili estas Tiu, kiun havas Jakob;
ĉar Li estas la kreinto de ĉio, kaj Izrael estas la gento
de Lia heredo; Eternulo Cebaot estas Lia nomo. 20
Vi estis por Mi martelo, ilo de batalo, kaj per vi Mi
frakasis naciojn, kaj per vi Mi ekstermis regnojn; 21 Mi
frakasis per vi ĉevalon kaj ĝian rajdanton, Mi frakasis
per vi ĉaron kaj ĝian veturanton; 22 Mi frakasis per
vi viron kaj virinon, Mi frakasis per vi maljunulon
kaj junulon, Mi frakasis per vi junulon kaj junulinon;
23 Mi frakasis per vi paŝtiston kaj lian ŝafaron, Mi

frakasis per vi terlaboriston kaj lian jungaĵon, Mi
frakasis per vi komandantojn kaj estrojn. 24 Kaj Mi
repagos al Babel kaj al ĉiuj loĝantoj de Ĥaldeujo pro
ilia tuta malbono, kiun ili faris en Cion antaŭ viaj
okuloj, diras la Eternulo. 25 Jen Mi iras kontraŭ vin,
ho pereiga monto, pereiganto de la tuta tero, diras
la Eternulo; Mi etendos Mian manon kontraŭ vin,
Mi rulĵetos vin de la rokoj kaj faros vin monto de
brulo. 26 Oni ne prenos el vi angulŝtonon, nek ŝtonon
por fundamento, sed vi estos eterna ruino, diras la
Eternulo. 27 Levu standardon en la lando, blovu per
trumpeto inter la nacioj, armu kontraŭ ĝin popolojn,
kunvoku kontraŭ ĝin la regnojn de Ararat, Mini, kaj
Aŝkenaz; starigu kontraŭ ĝin militestron, alkonduku
ĉevalojn kiel pikantajn skarabojn. 28 Armu kontraŭ ĝin
popolojn, la reĝojn de Medujo, ĝiajn komandantojn
kaj ĉiujn ĝiajn estrojn, kaj la tutan landaron, super
kiu ĝi regas. 29 Kaj la tero skuiĝas kaj tremas, ĉar
plenumiĝas super Babel la intencoj de la Eternulo, por
fari la landon de Babel dezerto, en kiu neniu loĝas. 30
La herooj de Babel ĉesis batali, ili restis en la fortikaĵoj;
malaperis ilia forto, ili fariĝis kiel virinoj; ĝiaj loĝejoj
ekbrulis, ĝiaj rigliloj estas rompitaj. 31 Kuranto kuras
renkonte al kuranto, sciiganto renkonte al sciiganto,
por raporti al la reĝo de Babel, ke lia urbo estas
venkoprenita ĉe ĉiuj flankoj, 32 ke la transirejoj estas
okupitaj, la fortikaĵoj brulas per fajro, kaj la militistojn
atakis teruro. 33 Ĉar tiele diras la Eternulo Cebaot,
Dio de Izrael: La filino de Babel estas kiel draŝejo
dum la draŝado; tre baldaŭ venos la tempo de ĝia
rikolto. 34 Manĝis min, frakasis min Nebukadnecar,
reĝo de Babel, li faris min malplena vazo, glutis min
kiel drako, plenigis sian ventron per miaj dolĉaĵoj,
kaj forpelis min. 35 La maljusteco kontraŭ mi kaj
mia karno estu nun sur Babel, diras la loĝantino
de Cion; kaj mia sango sur la loĝantoj de Ĥaldeujo,
diras Jerusalem. 36 Tial tiele diras la Eternulo: Jen
Mi juĝos vian aferon kaj Mi faros venĝon pro vi, Mi
sekigos ĝian maron kaj Mi senakvigos ĝian fonton. 37
Kaj Babel fariĝos amaso da ŝtonoj, loĝejo de ŝakaloj,
objekto de teruro kaj mokado, kaj neniu en ĝi loĝos.
38 Ili ĉiuj blekegos kiel junaj leonoj, krios kiel leonidoj.
39 Dum ilia varmegiĝo Mi faros al ili festenon, kaj
Mi ebriigos ilin, por ke ili fariĝu gajaj kaj ekdormu
per eterna dormo kaj ne vekiĝu, diras la Eternulo.
40 Mi kondukos ilin malsupren, kiel ŝafidojn al la
buĉo, kiel ŝafojn kun kaproj. 41 Kiele prenita estas
Ŝeŝaĥ! kaj kaptita la gloro de la tuta mondo! kiele
Babel fariĝis objekto de teruro inter la popoloj! 42
Leviĝis kontraŭ Babelon la maro kaj kovris ĝin per la
multego de siaj ondoj. 43 Ĝiaj urboj fariĝis dezerto,
tero seka kaj senviva, tero, sur kiu neniu loĝas kaj
tra kiu neniu homido trairas. 44 Kaj Mi punos Belon
en Babel, Mi eltiros el lia buŝo tion, kion li englutis,
kaj ne plu kolektiĝos al li popoloj; ankaŭ la muregoj
de Babel falos. 45 Eliru el ĝia interno, Mia popolo,
kaj ĉiu savu sian animon antaŭ la flama kolero de
la Eternulo, 46 por ke via koro ne senkuraĝiĝu kaj
vi ne ektimu, kiam oni aŭdos la famon en la lando;
ĉar venos famo en unu jaro, kaj post ĝi venos famo
en la sekvanta jaro, kaj sur la tero estos perforteco,
unu reganto kontraŭ alia reganto. 47 Tial jen venos
tempo, kaj Mi vizitos la idolojn en Babel, kaj ĝia tuta
lando estos hontigita, kaj ĉiuj ĝiaj mortigitoj falos
meze de ĝi. 48 Kaj ĝojkantos pri Babel la ĉielo kaj la
tero, kaj ĉio, kio estas sur ili; ĉar el la nordo venos al
ĝi ruinigantoj, diras la Eternulo. 49 Kiel Babel faligis
la mortigitojn de Izrael, tiel ankaŭ en Babel falos
mortigitoj el la tuta lando. 50 Vi, kiuj forsaviĝis de
glavo, iru, ne haltu; en malproksimeco rememoru la
Eternulon, kaj Jerusalem sin levu en via koro. 51 Ni
hontis, kiam ni aŭdis la insulton; honto kovris nian
vizaĝon, kiam fremduloj eniris en la sanktejon de la
domo de la Eternulo. 52 Tial jen venos tempo, diras la
Eternulo, kiam Mi vizitos ĝiajn idolojn, kaj en la tuta
lando ĝemos morte-vunditoj. 53 Eĉ se Babel leviĝus al
la ĉielo kaj se ĝi fortikigus alte sian forton, tamen
al ĝi venus de Mi ruinigantoj, diras la Eternulo. 54
Kriado estas aŭdata el Babel, kaj granda lamentado
el la lando de la Ĥaldeoj; 55 ĉar la Eternulo ruinigas
Babelon kaj pereigas ĝin kun ĝia granda bruo; iliaj
ondoj bruas kiel granda akvo, aŭdiĝas ilia malkvieta
voĉo. 56 Ĉar venos sur ĝin, sur Babelon, ruiniganto,
kaj kaptitaj estos ĝiaj herooj, rompitaj estos iliaj
pafarkoj; ĉar la Eternulo, Dio de repagado, nepre
repagos. 57 Mi ebriigos ĝiajn eminentulojn, saĝulojn,
komandantojn, estrojn, kaj heroojn, kaj ili ekdormos
per eterna dormo kaj ne vekiĝos, diras la Reĝo, kies
nomo estas Eternulo Cebaot. 58 Tiele diras la Eternulo
Cebaot: La larĝaj muregoj de Babel estos subfositaj,
kaj ĝiaj altaj pordegoj estos forbruligitaj per fajro; kaj
vana fariĝos la penado de la popoloj, kaj gentoj estos
lacigintaj sin por fajro. 59 Jen estas la vorto, kiun
ordonis la profeto Jeremia al Seraja, filo de Nerija, filo

de Maĥseja, kiam tiu iris kun Cidkija, reĝo de Judujo,
en Babelon, en la kvara jaro de lia reĝado; Seraja estis
la ripozejestro. 60 Kaj Jeremia enskribis en unu libron
la tutan malbonon, kiu venos sur Babelon, ĉiujn tiujn
vortojn, skribitajn pri Babel. 61 Kaj Jeremia diris al
Seraja: Kiam vi venos en Babelon, tiam rigardu kaj
tralegu ĉiujn tiujn vortojn, 62 kaj diru: Ho Eternulo!
Vi diris pri ĉi tiu loko, ke Vi ekstermos ĝin tiel, ke
estos en ĝi neniu loĝanto, nek homo, nek bruto, sed ĝi
estos eterna dezerto. 63 Kaj kiam vi finos la legadon
de ĉi tiu libro, alligu al ĝi ŝtonon, kaj ĵetu ĝin en la
mezon de Eŭfrato; 64 kaj diru: Tiele dronos Babel, kaj
ĝi ne releviĝos de la malfeliĉo, kiun Mi venigos sur
ĝin, kaj ili pereos. Ĝis ĉi tie estas la vortoj de Jeremia.

**52** La aĝon de dudek unu jaroj havis Cidkija, kiam
li fariĝis reĝo, kaj dek unu jarojn li reĝis en
Jerusalem. La nomo de lia patrino estis Ĥamutal, filino
de Jeremia, el Libna. 2 Li agadis malbone antaŭ la
Eternulo, kiel ĉio, kion faris Jehojakim. 3 Ĉar la kolero
de la Eternulo estis kontraŭ Jerusalem kaj kontraŭ
Judujo, ĝis Li forĵetis ilin de antaŭ Sia vizaĝo. Kaj
Cidkija defalis de la reĝo de Babel. 4 En la naŭa jaro
de lia reĝado, en la deka monato, en la deka tago
de la monato, venis Nebukadnecar, reĝo de Babel,
li kaj lia tuta militistaro, kontraŭ Jerusalemon, kaj
eksieĝis ĝin, kaj oni konstruis ĉirkaŭ ĝi bastionojn.
5 Kaj la urbo restis sieĝata ĝis la dek-unua jaro de
la reĝo Cidkija. 6 En la kvara monato, en la naŭa
tago de la monato, kiam la malsato tiel fortiĝis en la
urbo, ke la popolo de la lando ne havis panon, 7 tiam
oni faris enrompon en la urbon; kaj ĉiuj militistoj
forkuris, kaj eliris el la urbo nokte, laŭ la vojo de la
pordego inter la du muregoj apud la ĝardeno de la
reĝo, kaj foriris laŭ la vojo al la stepo. Kaj la Ĥaldeoj
staris ĉirkaŭ la urbo. 8 Kaj la militistaro de la Ĥaldeoj
postkuris la reĝon kaj kuratingis Cidkijan sur la stepo
de Jeriĥo, kaj lia tuta militistaro diskuris for de li. 9
Kaj ili kaptis la reĝon kaj forkondukis lin al la reĝo de
Babel, en Riblan, en la lando Ĥamat, kaj oni faris pri li
juĝon. 10 Kaj la reĝo de Babel buĉis la filojn de Cidkija
antaŭ liaj okuloj, kaj ankaŭ ĉiujn eminentulojn de
Judujo li buĉis en Ribla. 11 Kaj al Cidkija li blindigis la
okulojn, kaj ligis lin per kupraj katenoj; kaj la reĝo
de Babel venigis lin en Babelon, kaj metis lin en
malliberejon ĝis la tago de lia morto. 12 En la kvina
monato, en la deka tago de la monato, tio estas en
la dek-naŭa jaro de la reĝo Nebukadnecar, reĝo de
Babel, venis Nebuzaradan, estro de la korpogardistoj,
kiu ĉiam estis apud la reĝo de Babel, en Jerusalemon.
13 Kaj li forbruligis la domon de la Eternulo kaj la
domon de la reĝo kaj ĉiujn domojn de Jerusalem;
ĉiujn grandajn domojn li forbruligis per fajro. 14
Kaj ĉiujn muregojn de Jerusalem ĉirkaŭe detruis la
tuta militistaro de la Ĥaldeoj, kiu estis kun la estro
de la korpogardistoj. 15 La malriĉulojn el la urbo,
kaj la ceteran popolon, kiu restis en la urbo, kaj la
transkurintojn, kiuj transkuris al la reĝo de Babel, kaj
la ceteran popolamason forkondukis Nebuzaradan, la
estro de la korpogardistoj. 16 Sed iom el la malriĉuloj
de la lando Nebuzaradan, la estro de la korpogardistoj,
restigis, ke ili estu vinberistoj kaj terkultivistoj. 17 La
kuprajn kolonojn, kiuj estis en la domo de la Eternulo,
kaj la bazaĵojn kaj la kupran maron, kiuj estis en la
domo de la Eternulo, la Ĥaldeoj disrompis kaj forportis
ilian tutan kupron en Babelon. 18 Kaj la potojn kaj la
ŝovelilojn kaj la tranĉilojn kaj la aspergajn kalikojn
kaj la kulerojn kaj ĉiujn kuprajn vazojn, kiuj estis
uzataj ĉe la servado, ili forprenis. 19 Kaj la tasojn kaj
la karbujojn kaj la aspergajn kalikojn kaj la potojn
kaj la lucernojn kaj la kulerojn kaj la verŝilojn, kiuj
estis aŭ el oro aŭ el arĝento, prenis la estro de la
korpogardistoj. 20 Koncerne la du kolonojn, la unu
maron, la dek du kuprajn bovojn, kiuj servis kiel
subtenilo, kiujn faris la reĝo Salomono por la domo
de la Eternulo: la kvanto da kupro en ĉiuj tiuj iloj estis
nemezurebla. 21 La kolonoj havis ĉiu la alton de dek
ok ulnoj, kaj ĝin ĉirkaŭis ŝnuro, havanta la longon de
dek du ulnoj; ĝia diko estis kvar fingroj, kaj interne
ĝi estis malplena. 22 Ĝi havis sur si kupran kronon,
kaj la alto de unu krono estis kvin ulnoj; kaj ĉirkaŭ
la krono estis kradaĵo kaj granatoj, ĉio el kupro; tiel
same estis ĉe la dua kolono, ankaŭ kun granatoj. 23 Da
granatoj estis sur ĉiu flanko naŭdek ses; la nombro
de la granatoj ĉirkaŭ la krono estis cent. 24 Kaj la
korpogardistestro prenis la ĉefpastron Seraja kaj la
duan pastron Cefanja kaj la tri pordogardistojn. 25
Kaj el la urbo li prenis unu korteganon, kiu estis
super la militistoj, kaj sep virojn el la adjutantoj de la
reĝo, kiuj troviĝis en la urbo, kaj la skribiston de la
militestro, kiu enregistradis militistojn el la popolo de
la lando, kaj sesdek homojn el la popolo de la lando,
kiuj troviĝis en la urbo. 26 Ilin prenis Nebuzaradan,
la estro de la korpogardistoj, kaj forkondukis al la

reĝo de Babel en Riblan. 27 Kaj la reĝo de Babel frapis
ilin kaj mortigis ilin en Ribla, en la lando Ĥamat.
Tiamaniere Jehuda estis elhejmigita el sia lando. 28
Jen estas la kvanto de la popolo, kiun Nebukadnecar
elhejmigis: en la sepa jaro tri mil dudek tri Judojn; 29
en la dek-oka jaro de Nebukadnecar okcent tridek
du homojn el Jerusalem; 30 en la dudek-tria jaro
de Nebukadnecar la korpogardistestro Nebuzaradan
elhejmigis sepcent kvardek kvin homojn el la Judoj: la
kvanto de ĉiuj estis kvar mil sescent homoj. 31 En la
tridek-sepa jaro post la elpatrujigo de Jehojaĥin, reĝo
de Judujo, en la dek-dua monato, en la dudek-kvina
tago de la monato, Evil-Merodaĥ, reĝo de Babel, en la
unua jaro de sia reĝado, levis la kapon de Jehojaĥin,
reĝo de Judujo, kaj elirigis lin el la malliberejo; 32
kaj li parolis kun li afable, kaj starigis lian tronon pli
alte ol la tronoj de la aliaj reĝoj, kiuj estis ĉe li en
Babel; 33 kaj li ŝanĝis liajn vestojn de malliberejo; kaj
li manĝadis ĉiam ĉe li dum sia tuta vivo. 34 Kaj liaj
vivrimedoj, vivrimedoj konstantaj, estis donataj al li
de la reĝo de Babel ĉiutage dum lia tuta vivo, ĝis la
tago de lia morto.

# Plorkanto

1 Kiel solece sidas la urbo, kiu estis tiel multehoma!
La estrino de la nacioj fariĝis kiel vidvino, La
princino de landoj fariĝis tributulino! 2 Senĉese ŝi
ploras en la nokto, kaj ŝiaj larmoj estas sur ŝiaj vangoj;
Ŝi havas neniun konsolanton inter ĉiuj siaj amintoj,
Ĉiuj ŝiaj amikoj ŝin perfidis, fariĝis ŝiaj malamikoj. 3
Elmigris Jehuda pro mizero kaj tro malfacila laborado;
Li ekloĝis inter la nacioj, sed ne trovas ripozon; Ĉiuj
liaj persekutantoj atingis lin en malvastaj lokoj. 4 La
vojoj de Cion estas malĝojaj, ĉar neniu iras al festoj;
Ĉiuj ĝiaj pordegoj dezertiĝis, ĝiaj pastroj ĝemas; Ĝiaj
virgulinoj ploras, kaj al ĝi mem estas tre maldolĉe.
5 Ĝiaj kontraŭuloj fariĝis ĉefoj, ĝiaj malamikoj ĝuas
bonstaton; Ĉar la Eternulo ĵetis sur ĝin mizeron pro
la multo de ĝiaj malbonagoj; Ĝiaj infanoj iris en
kaptitecon, pelataj de la malamiko. 6 Foriĝis de la
filino de Cion ŝia tuta beleco; Ŝiaj princoj fariĝis kiel
cervoj, kiuj ne trovas paŝtejon, Kaj ili iras senforte
antaŭ la pelanto. 7 En la tagoj de sia mizero kaj suferoj
Jerusalem rememoras ĉiujn ĉarmaĵojn, kiujn ŝi havis
en la tempoj pasintaj; Dume nun ŝia popolo enfalis
en la manon de premanto, kaj neniu ŝin helpas, La
malamikoj ŝin rigardas kaj ridas pri ŝia ruiniĝo. 8
Pekis, pekis Jerusalem, tial ŝi fariĝis kiel hontindulino;
Ĉiuj, kiuj ŝin estimis, nun malestimas ŝin, ĉar ili vidas
ŝian malhonoron; Kaj ŝi mem ĝemas kaj turnas sin
malantaŭen. 9 Ŝia malpuraĵo estas sur la rando de
ŝia vesto; ŝi ne pensis pri sia estonteco; Tial ŝi terure
malaltiĝis, kaj ŝi havas neniun konsolanton: Rigardu,
ho Eternulo, mian mizeron, ĉar la malamiko forte
fieras. 10 La malamiko etendis sian manon sur ĉiujn
ŝiajn grandvaloraĵojn; Ŝi vidas, kiel en ŝian sanktejon
eniras nacioj, Pri kiuj Vi ordonis, ke ili ne eniru en
Vian komunumon. 11 Ŝia tuta popolo ĝemas, ili serĉas
panon, Ili fordonas siajn grandvaloraĵojn pro manĝaĵo,
por revigligi sian animon: Rigardu, ho Eternulo, kaj
vidu, kiel malestimata mi fariĝis! 12 Ho vi, ĉiuj, kiuj
preteriras la vojon, rigardu kaj vidu, Ĉu ekzistas sufero
simila al mia sufero, Kiu trafis min kaj kiun la Eternulo
ĵetis sur min en la tago de Lia flama kolero. 13 De
supre Li ĵetis fajron en miajn ostojn, kaj ĝi ekregis
en ili; Li etendis reton antaŭ miaj piedoj, renversis
min malantaŭen; Li ruinigis min, faris min dolorplena
dum la tuta tago. 14 Kunplektiĝis per Lia mano la jugo
de miaj pekoj; Ili kunplektiĝis, suriris sur mian kolon;
Li faligis mian forton; La Sinjoro transdonis min en
tiajn manojn, el kiuj mi ne povas leviĝi. 15 La Sinjoro
dispremis per la piedoj ĉiujn miajn fortulojn interne
de mi; Li kunvokis festan kunvenon kontraŭ min, por
disbati miajn junulojn; Kiel en vinpremejo la Sinjoro
piedpremis la virgulinon-filinon de Jehuda. 16 Pro
tio mi ploras kaj miaj ambaŭ okuloj abunde fluigas
akvon; Ĉar malproksime de mi estas konsolanto, kiu
povus revigligi mian animon; Miaj infanoj pereis, ĉar
la malamiko venkis. 17 Cion etendas siajn manojn, sed
ĝi ne trovas konsolanton; La Eternulo vokis kontraŭ
Jakobon liajn malamikojn de ĉiuj flankoj; Jerusalem
fariĝis inter ili kiel hontindulino. 18 Justa Li estas, la
Eternulo, ĉar mi malobeis Liajn vortojn. Aŭskultu,
ho ĉiuj popoloj, kaj rigardu mian suferadon: Miaj
virgulinoj kaj junuloj iris en kaptitecon. 19 Mi vokis
miajn amikojn, sed ili min trompis; Miaj pastroj kaj
miaj plejaĝuloj estas mortantaj en la urbo, Ili serĉas
por si panon, por revigligi sian animon. 20 Rigardu, ho
Eternulo, en kia mizero mi estas! Miaj internaĵoj ŝvelis,
mia koro renversiĝis en mi, ĉar mi forte malobeis.
Ekstere seninfanigis min la glavo, kaj en la domo la
morto. 21 Oni aŭdas, kiel mi ĝemas, sed neniu min
konsolas; Ĉiuj miaj malamikoj aŭdis pri mia malfeliĉo,
kaj ekĝojis, ĉar Vi tion faris; Venigu do la tagon,
kiam Vi proklamos, ke ili fariĝu kiel mi. 22 Ilia tuta
malboneco venu antaŭ Vin; Kaj agu kun ili tiel, kiel Vi
agis kun mi pro ĉiuj miaj pekoj; Ĉar granda estas mia
ĝemado, kaj mia koro doloras.

2 Kiele la Sinjoro en Sia kolero kovris per mallumo
la filinon de Cion! De la ĉielo sur la teron Li
ĵetegis la belecon de Izrael, Kaj ne rememoris Sian
piedbenketon en la tago de Sia kolero. 2 Senindulge
ekstermis la Sinjoro ĉiujn loĝejojn de Jakob; Li detruis
en Sia kolero la fortikaĵojn de la filino de Jehuda,
alniveligis ilin al la tero; Li frapis la regnon kaj ĝiajn
regantojn. 3 En flama kolero Li rompis ĉiujn kornojn
de Izrael; Li tiris Sian dekstran manon malantaŭen,
kiam venis la malamiko; Kaj Li ekbruligis en Jakob
kvazaŭ flamantan fajron, kiu ekstermas ĉion ĉirkaŭe.
4 Li streĉis Sian pafarkon kiel malamiko, direktis Sian
dekstran manon kiel atakanto, Kaj mortigis ĉion, kio
estis ĉarma por la okuloj; En la tendo de la filino de
Cion Li elverŝis Sian koleron kiel fajron. 5 La Sinjoro
fariĝis kiel malamiko, Li ekstermis Izraelon, ekstermis
ĉiujn liajn palacojn, detruis liajn fortikaĵojn; Kaj al la

filino de Jehuda Li donis multe da plorado kaj ĝemado.
6 Kiel ĝardenon Li ruinigis lian tendon, detruis lian
kunvenejon; La Eternulo forgesigis en Cion feston
kaj sabaton, Kaj forpuŝis en la indigno de Sia kolero
reĝon kaj pastron. 7 La Sinjoro forlasis Sian altaron,
abomenis Sian sanktejon, Transdonis en la manojn de
malamikoj la murojn de ĝiaj palacoj; Ili faris bruon
en la domo de la Eternulo kiel en tago de festo. 8
La Eternulo decidis ekstermi la muregon de la filino
de Cion; Li eltiris la mezurŝnuron, ne detenis Sian
manon de ekstermado; Li funebrigis la fortikaĵon
kaj muregon, ambaŭ havas nun mizeran aspekton. 9
Enprofundiĝis en la teron ĝiaj pordegoj; Li detruis
kaj rompis ĝiajn riglilojn; Ĝia reĝo kaj ĝiaj princoj
estas inter la nacioj; La leĝoj jam ne ekzistas, kaj
ĝiaj profetoj ne plu ricevas vizion de la Eternulo. 10
Silente sidas sur la tero la plejaĝuloj de la filino de
Cion; Polvon ili metis sur sian kapon, zonis sin per
sakaĵo; Al la tero klinis sian kapon la virgulinoj de
Jerusalem. 11 Konsumiĝis de larmoj miaj okuloj, ŝvelis
miaj internaĵoj, Elverŝiĝis sur la teron mia hepato,
pro la pereo de la filino de mia popolo, Kiam infanoj
kaj suĉinfanoj senfortiĝis de malsato sur la stratoj de
la urbo. 12 Al siaj patrinoj ili diris: Kie estas pano kaj
vino? Ili falis kiel vunditaj sur la stratoj de la urbo,
Kaj eligis sian animon sur la brusto de siaj patrinoj.
13 Kiun mi povas montri al vi, kun kiu mi povas
kompari vin, ho filino de Jerusalem? Kiun similan
mi povas montri al vi, por konsoli vin, ho virgulino-
filino de Cion? Ĉar granda kiel la maro estas via
malfeliĉo; kiu vin resanigos? 14 Viaj profetoj profetis
al vi malveraĵon kaj sensencaĵon, Kaj ne montris al
vi viajn malbonagojn, por antaŭgardi vin kontraŭ
kaptiteco; Ili predikis al vi viziojn malverajn, kiuj
alportis al vi elpelon. 15 Kunfrapas pri vi siajn manojn
ĉiuj preterirantoj; Ili fajfas kaj balancas la kapon pri
la filino de Jerusalem, dirante: Ĉu tio estas la urbo,
kiun oni nomis perfektaĵo de beleco, ĝojo de la tuta
tero? 16 Malfermegas kontraŭ vi sian buŝon ĉiuj viaj
malamikoj; Ili fajfas kaj grincigas la dentojn, dirante:
Ni englutis ŝin; Ĉi tiun tagon ni atendis, ni ĝin atingis,
ni ĝin vidas. 17 La Eternulo plenumis tion, kion Li
intencis; Li plenumis Sian vorton, kiun Li eldiris antaŭ
longa tempo; Li detruis senindulge, Li ĝojigis pri vi la
malamikon, Li altigis la kornon de viaj kontraŭuloj. 18
Ilia koro krias al la Sinjoro: Ho murego de la filino de
Cion, verŝu larmojn kiel torento tage kaj nokte; Ne
ripozu, la pupilo de via okulo ne silentu. 19 Leviĝu,
ploregu en la nokto en la komenco de ĉiu gardoparto;
Elverŝu kiel akvon vian koron antaŭ la vizaĝo de la
Sinjoro; Levu al Li viajn manojn pro la animo de viaj
infanoj, kiuj senfortiĝas de malsato en la komenco de
ĉiuj stratoj. 20 Rigardu, ho Eternulo, kaj vidu, kun
kiu Vi agis tiamaniere! Ĉu ie aliloke manĝis virinoj
sian frukton, siajn dorlotitajn infanojn? Ĉu ie estis
mortigataj en la sanktejo de la Sinjoro pastroj kaj
profetoj? 21 Surtere sur la stratoj kuŝis junuloj kaj
maljunuloj; Miaj junulinoj kaj junuloj falis de glavo;
Vi mortigis en la tago de Via kolero, buĉis kaj ne
kompatis. 22 Kiel por festa tago Vi kunvokis de ĉirkaŭe
miajn terurajn najbarojn, Kaj en la tago de la kolero
de la Eternulo neniu saviĝis, neniu restis; Tiujn, kiujn
mi dorlotis kaj edukis, ĉiujn ekstermis mia malamiko.

3 Mi estas la viro, kiu spertis suferon sub la vergo
de Lia kolero. 2 Min Li kondukis kaj irigis en
mallumon, ne en lumon. 3 Nur sur min Li turnas Sian
manon ĉiutage denove. 4 Li maljunigis mian karnon
kaj haŭton, rompis miajn ostojn. 5 Li konstruis ĉirkaŭ
mi, ĉirkaŭis min per maldolĉaĵoj kaj malfacilaĵoj. 6 En
mallumon Li lokis min, kiel porĉiamajn mortintojn. 7
Li ĉirkaŭbaris min, ke mi ne povu eliri; Li ligis min
per pezaj ĉenoj. 8 Kvankam mi krias kaj vokas, Li
kovras Siajn orelojn antaŭ mia preĝo. 9 Li baris miajn
vojojn per hakitaj ŝtonoj; Li kurbigis miajn vojetojn.
10 Li estas por mi kiel urso en embusko, kiel leono
en kaŝita loko. 11 Li depuŝis min de miaj vojoj, kaj
disŝiris min; Li faris min objekto de teruro. 12 Li
streĉis Sian pafarkon, kaj starigis min kiel celon por
Siaj sagoj. 13 En miajn renojn Li pafis la filojn de Sia
sagujo. 14 Mi fariĝis mokataĵo por mia tuta popolo,
ilia ĉiutaga rekantaĵo. 15 Li satigis min per maldolĉaĵo,
trinkoplenigis min per vermuto. 16 Li disrompis miajn
dentojn en malgrandajn pecojn, Li enpuŝis min en
cindron. 17 Mia animo estas forpuŝita for de paco;
bonstaton mi forgesis. 18 Kaj mi diris: Pereis mia forto
kaj mia espero al la Eternulo. 19 La memoro pri mia
mizero kaj miaj suferoj estas vermuto kaj galo. 20
Konstante rememorante tion, senfortiĝas en mi mia
animo. 21 Sed tion mi respondas al mia koro, kaj tial
mi esperas: 22 Ĝi estas favorkoreco de la Eternulo, ke
ni ne tute pereis; ĉar Lia kompatemeco ne finiĝis, 23
Sed ĉiumatene ĝi renoviĝas; granda estas Via fideleco.
24 Mia parto estas la Eternulo, diras mia animo; tial mi

esperas al Li. 25 La Eternulo estas bona por tiuj, kiuj
esperas al Li, por la animo, kiu serĉas Lin. 26 Bone
estas esperi pacience helpon de la Eternulo. 27 Bone
estas al la homo, kiu portas jugon en sia juneco; 28 Li
sidas solece kaj silentas, kiam li estas ŝarĝita; 29 Li
metas sian buŝon en polvon, kredante, ke ekzistas
espero; 30 Li donas sian vangon al tiu, kiu lin batas;
li satigas sin per malhonoro. 31 Ĉar ne por eterne
forlasas la Sinjoro; 32 Se Li iun suferigas, Li ankaŭ
kompatas pro Sia granda favorkoreco; 33 Ĉar ne el Sia
koro Li sendas mizeron kaj suferon al la homoj. 34
Kiam oni premas sub siaj piedoj ĉiujn malliberulojn de
la tero, 35 Kiam oni forklinas la rajton de homo antaŭ
la vizaĝo de la Plejaltulo, 36 Kiam oni estas maljusta
kontraŭ homo en lia juĝa afero — Ĉu la Sinjoro tion
ne vidas? 37 Kiu povas per sia diro atingi, ke io fariĝu,
se la Sinjoro tion ne ordonis? 38 Ĉu ne el la buŝo
de la Plejaltulo eliras la decidoj pri malbono kaj pri
bono? 39 Kial murmuras homo vivanta? Ĉiu murmuru
kontraŭ siaj pekoj. 40 Ni trarigardu kaj esploru nian
konduton, kaj ni revenu al la Eternulo; 41 Ni levu nian
koron kaj niajn manojn al Dio en la ĉielo. 42 Ni pekis
kaj malobeis, kaj Vi ne pardonis. 43 Vi kovris Vin per
kolero kaj persekutis nin; Vi mortigis, Vi ne kompatis.
44 Vi kovris Vin per nubo, por ke ne atingu Vin la
preĝo. 45 Vi faris nin balaindaĵo kaj abomenindaĵo
inter la popoloj. 46 Malfermegis kontraŭ ni sian buŝon
ĉiuj niaj malamikoj. 47 Teruro kaj pereo trafis nin,
ruinigo kaj malfeliĉo. 48 Torentojn da akvo verŝas
mia okulo pri la malfeliĉo de la filino de mia popolo.
49 Mia okulo fluigas kaj ne ĉesas, ne ekzistas por ĝi
halto, 50 Ĝis la Eternulo ekrigardos kaj ekvidos de la
ĉielo. 51 Mia okulo suferigas mian animon pri ĉiuj
filinoj de mia urbo. 52 Senkaŭze ĉasas min kiel birdon
miaj malamikoj; 53 Ili pereigas mian vivon en kavo, ili
ĵetas sur min ŝtonojn. 54 Akvo leviĝis kontraŭ mian
kapon, kaj mi diris: Mi tute pereis. 55 Mi vokis Vian
nomon, ho Eternulo, el la profunda kavo; 56 Vi aŭdis
mian voĉon; ne kovru Vian orelon antaŭ mia vokado
pri liberigo. 57 Vi alproksimiĝis, kiam mi vokis al Vi;
Vi diris: Ne timu. 58 Vi, ho Sinjoro, defendis mian
juĝaferon; Vi liberigis mian vivon. 59 Vi vidis, ho
Eternulo, la maljustaĵon, kiun mi suferas; juĝu mian
aferon. 60 Vi vidis ilian tutan venĝon, ĉiujn iliajn
intencojn kontraŭ mi. 61 Vi aŭdis ilian insultadon,
ho Eternulo, ĉiujn iliajn intencojn kontraŭ mi, 62 La
parolojn de tiuj, kiuj leviĝis kontraŭ min, kaj iliajn
pensojn kontraŭ mi dum la tuta tago. 63 Rigardu,
kiam ili sidas kaj kiam ili leviĝas; mi ĉiam estas ilia
rekantaĵo. 64 Redonu al ili repagon, ho Eternulo, laŭ la
faroj de iliaj manoj. 65 Donu al ili doloron en la koro,
sentigu al ili Vian malbenon. 66 Persekutu ilin en
kolero, kaj ekstermu ilin el sub la ĉielo de la Eternulo.

**4** Kiele senbriliĝis la oro, ŝanĝiĝis la bonega metalo!
La ŝtonoj de la sanktejo kuŝas disĵetitaj en la
komenco de ĉiuj stratoj! 2 La karaj filoj de Cion,
havantaj la valoron de plej pura oro, Kiele ili similiĝis
al argilaj potoj, faritaĵo de potisto! 3 Eĉ ŝakaloj donas
siajn mamojn kaj nutras siajn idojn; Sed la filino de
mia popolo fariĝis kruela, kiel strutoj en la dezerto.
4 La lango de suĉinfano algluiĝis al ĝia palato pro
soifo; Infanoj petas panon, sed neniu donas al ili.
5 Kiuj antaŭe manĝadis frandaĵojn, tiuj senfortiĝas
nun pro malsato sur la stratoj; Kiuj estis edukitaj sur
purpuro, tiuj ruliĝas nun sur sterko. 6 La pekoj de la
filino de mia popolo estas pli grandaj, ol la pekoj de
Sodom, Kiu estis renversita momente, kaj manoj ĝin
ne turmentis. 7 Ŝiaj princoj estis pli puraj ol neĝo, pli
klaraj ol lakto; Ilia vizaĝo estis pli ruĝa ol koraloj, ili
aspektis kiel safiro; 8 Nun ilia vizaĝo estas pli nigra ol
karbo; oni ne rekonas ilin sur la stratoj; Ilia haŭto
alpendiĝis al iliaj ostoj, velksekiĝis kiel ligno. 9 Pli
bone estis al tiuj, kiuj mortis de glavo, ol al tiuj, kiuj
mortas de malsato, Kiuj senfortiĝas kaj pereas pro
manko de produktaĵoj de kampo. 10 La manoj de
kompatemaj virinoj kuiris iliajn infanojn; Kaj ĉi tiuj
fariĝis ilia manĝaĵo en la mizerego de la filino de mia
popolo. 11 La Eternulo plene elĉerpis Sian koleron, Li
elverŝis la flamon de Sia indigno; Li ekbruligis en Cion
fajron, kiu ekstermis ĝiajn fundamentojn. 12 Ne kredis
la reĝoj de la tero, nek ĉiuj loĝantoj de la mondo, Ke
malamiko kaj kontraŭulo eniros en la pordegojn de
Jerusalem. 13 Tio fariĝis pro la pekoj de ĝiaj profetoj,
pro la malbonagoj de ĝiaj pastroj, Kiuj verŝadis en ĝi
sangon de virtuloj. 14 Kiel blinduloj ili vagadis sur la
stratoj, Malpurigis sin per sango tiel, ke oni ne povis
tuŝi iliajn vestojn. 15 Oni kriis al ili: For, malpuruloj!
for, for, ne altuŝiĝu! Kiam ili foriĝadis kaj vagadis,
oni diradis inter la nacioj: Ili ne plu loĝos tie. 16 La
vizaĝo de la Eternulo ilin disĵetis, kaj jam ne volas
rigardi ilin; Pastrojn ili ne respektis, plejaĝulojn ili ne
kompatis. 17 Ankoraŭ laciĝadis niaj okuloj, atendante
senvaloran helpon; Streĉe ni atendis nacion, kiu ne

povas helpi. 18 Ili glitigis niajn paŝojn, ke ni ne povu
iri sur niaj stratoj. Alproksimiĝis nia fino; pleniĝis
nia tempo, ĉar venis nia fino. 19 Pli rapidaj ol agloj
de la ĉielo estis niaj persekutantoj; Sur la montoj
ili postkuris nin, en la dezerto ili faris embuskojn
kontraŭ ni. 20 La spiro de nia vivo, la sanktoleito de la
Eternulo, kaptiĝis en iliajn kavojn, Pri kiu ni diris:
Sub lia ombro ni vivos inter la nacioj. 21 Ĝoju kaj
estu gaja, ho filino de Edom, kiu loĝas en la lando Uc;
Ankaŭ al vi venos la kaliko, vi ebriiĝos kaj nudiĝos. 22
Finiĝis viaj malbonagoj, ho filino de Cion; Li vin ne
plu forkondukigos; Sed viajn malbonagojn, ho filino
de Edom, Li punos, Li malkovros viajn pekojn.

5 Rememoru, ho Eternulo, kio fariĝis al ni; Rigardu
kaj vidu nian malhonoron! 2 Nia heredaĵo transiris
al fremduloj, Niaj domoj al aligentuloj. 3 Ni fariĝis
orfoj senpatraj, Niaj patrinoj estas kiel vidvinoj. 4 Nian
akvon ni trinkas pro mono; Nian lignon ni ricevas nur
pro pago. 5 Oni pelas nin je nia kolo; Ni laciĝis, sed
oni ne permesas al ni ripozi. 6 Al Egiptujo ni etendis
la manon, Al Asirio, por satiĝi per pano. 7 Niaj patroj
pekis, sed ili jam ne ekzistas; Kaj ni devas suferi pro
iliaj malbonagoj. 8 Sklavoj regas super ni; Kaj neniu
liberigas nin el iliaj manoj. 9 Kun danĝero por nia vivo
ni akiras nian panon, Pro la glavo en la dezerto. 10 Nia
haŭto varmegiĝis kiel forno, Por la kruela malsato. 11
La virinojn en Cion ili senhonorigis, La virgulinojn
en la urboj de Judujo. 12 La princoj estas pendigitaj
je siaj manoj; La maljunulojn oni ne respektis. 13 La
junuloj devas porti muelŝtonojn; La knaboj falas sub
la lignoŝarĝoj. 14 La maljunuloj jam ne sidas ĉe la
pordegoj, La junuloj jam ne kantas. 15 Malaperis la
gajeco de nia koro; Niaj dancrondoj aliformiĝis en
funebron. 16 Defalis la krono de nia kapo; Ho ve al ni,
ke ni pekis! 17 Pro tio senfortiĝis nia koro, Pro tio
senlumiĝis niaj okuloj: 18 Pro la monto Cion, ke ĝi
fariĝis dezerta, Ke vulpoj vagas sur ĝi. 19 Sed Vi, ho
Eternulo, kiu restas eterne Kaj kies trono staras de
generacio al generacio, 20 Kial Vi forgesis nin kvazaŭ
por eterne, Forlasis nin por longa tempo? 21 Reirigu
nin, ho Eternulo, al Vi, ke ni revenu; Renovigu niajn
tagojn kiel en la tempo antaŭa. 22 Ĉar ĉu Vi nin tute
forpuŝis? Vi tre forte ekkoleris kontraŭ ni.

# Jeĥezkel

**1** En la trideka jaro, en la kvina tago de la kvara
monato, kiam mi estis inter la elpatrujigitoj ĉe
la rivero Kebar, malfermiĝis la ĉielo, kaj mi ekvidis
viziojn de Dio. 2 En la kvina tago de tiu monato,
tio estas, en la kvina jaro post la elpatrujigo de la
reĝo Jehojaĥin, 3 aperis la vorto de la Eternulo al
la pastro Jeĥezkel, filo de Buzi, en la lando Ĥaldea,
ĉe la rivero Kebar, kaj tie aperis sur li la mano de la
Eternulo. 4 Kaj mi vidis, jen malkvieta vento venis el
la nordo kun granda nubo kaj flamanta fajro; brilo
estis ĉirkaŭe de ĝi, kaj el interne, el la mezo de la
fajro, iris tre hela lumo. 5 El la mezo vidiĝis bildo de
kvar kreitaĵoj, kaj ilia aspekto estis kiel aspekto de
homo. 6 Kaj ĉiu havis kvar vizaĝojn, kaj ĉiu el ili havis
kvar flugilojn. 7 Iliaj piedoj estis piedoj rektaj, kaj
la plandoj de iliaj piedoj estis kiel plando de bovido
kaj brilis kiel hela pura kupro. 8 Kaj homaj manoj
estis sub iliaj flugiloj ĉe iliaj kvar flankoj; ĉiuj kvar
havis siajn vizaĝojn kaj siajn flugilojn. 9 Iliaj flugiloj
estis kuntuŝiĝantaj unu kun la alia; irante, ili sin ne
deturnadis, sed ĉiu iradis laŭ la direkto de sia vizaĝo.
10 La aspekto de iliaj vizaĝoj estis kiel vizaĝo homa,
kaj kiel vizaĝo leona sur la dekstra flanko de ĉiuj kvar,
kiel vizaĝo bova sur la maldekstra flanko de ĉiuj kvar,
kaj kiel vizaĝo agla ĉe ĉiuj kvar. 11 Iliaj vizaĝoj kaj
flugiloj supre estis disigitaj; ĉe ĉiu el ili du flugiloj
tuŝis unu la alian kaj du kovris ilian korpon. 12 Ĉiu
iradis laŭ la direkto de sia vizaĝo; kien tiris ilin la
spirito, tien ili iradis, ne deturnante sin dum sia irado.
13 La aspekto de la kreitaĵoj estis kiel aspekto de
ardantaj kaj brulantaj karboj, kiel aspekto de torĉoj,
irantaj inter tiuj kreitaĵoj; brilon havis la fajro, kaj el
la fajro eliradis fulmoj. 14 Kaj la kreitaĵoj kuradis tien
kaj reen kiel fulmoj. 15 Rigardante la kreitaĵojn, mi
ekvidis, ke sur la tero apud la kreitaĵoj troviĝis po
unu rado ĉe la kvar vizaĝoj. 16 La aspekto de la radoj
kaj ilia prilaboriteco estis kiel aspekto de turkiso,
ĉiuj kvar havis la saman aspekton; ilia aspekto kaj
prilaboriteco estis tiel, kvazaŭ unu rado troviĝus en la
alia. 17 Irante, ili sin movadis sur siaj kvar flankoj; ili
ne deturnadis sin dum la irado. 18 Iliaj radrondoj estis
altaj kaj teruraj; la radrondoj de ĉiuj kvar estis plenaj
de okuloj ĉirkaŭe. 19 Kaj kiam la kreitaĵoj iris, la radoj
iradis apud ili; kaj kiam la kreitaĵoj leviĝis de la tero,
leviĝadis ankaŭ la radoj. 20 Kien la spirito instigis ilin
iri, tien ili iradis; kien la spirito instigis ilin iri, la radoj
leviĝadis kune kun ili, ĉar la spirito de la kreitaĵoj
estis en la radoj. 21 Kiam tiuj iris, ili ankaŭ iradis; kiam
tiuj staris, ili ankaŭ staris; kiam tiuj leviĝis de la tero,
la radoj leviĝadis apud ili, ĉar la spirito de la kreitaĵoj
estis en la radoj. 22 Super la kapoj de la kreitaĵoj
estis io simila al firmamento, kvazaŭ terura kristalo,
etendita super iliaj kapoj supre. 23 Sub la firmamento
estis etenditaj iliaj flugiloj, rekte unu apud la alia; la
korpon de ĉiu el ili kovris du flugiloj. 24 Mi aŭdis, kiel
iliaj flugiloj dum ilia irado bruis kiel granda akvo, kiel
la voĉo de la Plejpotenculo, granda bruo, kiel bruo
de tendaro; kiam ili haltis, iliaj flugiloj malleviĝis.
25 Kiam aŭdiĝis voĉo el super la firmamento, kiu
estis super iliaj kapoj, ili haltadis kaj mallevadis siajn
flugilojn. 26 Supre de la firmamento, kiu estis super
iliaj kapoj, estis io, aspektanta kiel safiro, havanta
la formon de trono; kaj super la bildo de la trono
estis kvazaŭ bildo de homo, sidanta sur ĝi. 27 Kaj mi
vidis kvazaŭ helegan brilon, kvazaŭ fajron interne
kaj ĉirkaŭe, de la bildo de liaj lumboj supren kaj de
la bildo de liaj lumboj malsupren; mi vidis aspekton
de fajro kaj brilon ĉirkaŭ de li. 28 Kiel la aspekto de
ĉielarko, kiu montriĝas en la nuboj en la tempo de
pluvo, tia estis la aspekto de la brilo ĉirkaŭe. Tio estis
la aspekto de la majesto de la Eternulo. Kiam mi tion
vidis, mi ĵetis min vizaĝaltere, kaj mi aŭdis voĉon de
parolanto.

**2** Kaj Li diris al mi: Ho filo de homo, stariĝu sur viaj
piedoj, kaj Mi parolos al vi. 2 Kaj kiam Li parolis
al mi, venis en min spirito kaj starigis min sur miaj
piedoj; kaj mi aŭskultis Tiun, kiu parolis al mi. 3
Kaj Li diris al mi: Ho filo de homo, Mi sendas vin
al la Izraelidoj, al la defalintaj gentoj, kiuj defalis
de Mi; ili kaj iliaj patroj perfidis Min ĝis la nuna
tago. 4 La filoj havas malmolan vizaĝon kaj obstinan
koron; Mi sendas vin al ili, por ke vi diru al ili: Tiele
diras la Sinjoro, la Eternulo. 5 Ĉu ili aŭskultos, ĉu
ili ne aŭskultos (ĉar ili estas domo malobeema), ili
almenaŭ sciu, ke profeto estis inter ili. 6 Kaj vi, ho
filo de homo, ne timu ilin, kaj ne timu iliajn parolojn;
kvankam ili estas por vi dornoj kaj pikiloj kaj vi
loĝas inter skorpioj, tamen ne timu iliajn vortojn,
kaj ne sentu teruron antaŭ ilia vizaĝo, ĉar ili estas
domo malobeema. 7 Kaj diru al ili Miajn vortojn,
ĉu ili aŭskultos aŭ ĉu ili ne aŭskultos, ĉar ili estas
malobeemaj. 8 Kaj vi, ho filo de homo, aŭskultu

tion, kion Mi diras al vi; ne estu malobeema, kiel la
malobeema domo; malfermu vian buŝon, kaj manĝu
tion, kion Mi donos al vi. 9 Kaj mi ekvidis, jen mano
estas etendita al mi, kaj en ĝi estas skribrulaĵo. 10
Kaj Li disvolvis ĝin antaŭ mi, kaj ĝi estis skribkovrita
interne kaj ekstere, kaj sur ĝi estis skribitaj lamentoj,
ĝemoj, kaj veoj.

3 Kaj Li diris al mi: Ho filo de homo, manĝu tion, kion
vi trovas, manĝu ĉi tiun skribrulaĵon, kaj iru kaj
parolu al la domo de Izrael. 2 Kaj mi malfermis mian
buŝon, kaj Li manĝigis al mi tiun skribrulaĵon. 3 Kaj Li
diris al mi: Ho filo de homo, en vian ventron manĝu,
kaj vian internaĵon plenigu per ĉi tiu skribrulaĵo, kiun
Mi donas al vi. Kaj mi manĝis, kaj en mia buŝo ĝi
estis dolĉa, kiel mielo. 4 Kaj Li diris al mi: Ho filo de
homo, iru al la domo de Izrael, kaj parolu al ili per
Miaj vortoj. 5 Ĉar ne al popolo kun nekomprenebla
lingvo kaj malfacila parolado vi estas sendata, sed
al la domo de Izrael; 6 ne al multaj popoloj kun
nekomprenebla lingvo kaj malfacila parolado, kies
vortojn vi ne komprenas; cetere, se eĉ al ili Mi sendus
vin, eĉ ili aŭskultus vin. 7 Sed la domo de Izrael ne
volos aŭskulti vin, ĉar ili ne volas aŭskulti Min; ĉar
la tuta domo de Izrael havas malmolan frunton kaj
obstinan koron. 8 Jen Mi faris vian vizaĝon forta
kontraŭ iliaj vizaĝoj kaj vian frunton forta kontraŭ
iliaj fruntoj. 9 Mi faris vian frunton kiel diamanto pli
forta ol siliko; ne timu ilin, kaj ne sentu teruron antaŭ
ili, ĉar ili estas domo malobeema. 10 Kaj Li diris al mi:
Ho filo de homo, ĉiujn Miajn vortojn, kiujn Mi parolos
al vi, prenu en vian koron kaj aŭskultu per viaj oreloj.
11 Kaj iru al la elpelitoj, al la filoj de via popolo, kaj
parolu al ili, kaj diru al ili: Tiele diras la Sinjoro, la
Eternulo — tute egale, ĉu ili aŭskultos aŭ ne aŭskultos.
12 Kaj levis min la spirito, kaj mi ekaŭdis malantaŭ mi
grandan bruon: Benita estu la majesto de la Eternulo
sur sia loko! 13 Kaj aŭdiĝis bruo de la flugiloj de la
kreitaĵoj, kiuj kunfrapiĝadis unuj kun la aliaj, kaj bruo
de la radoj apud ili, kaj bruo de granda tertremo. 14
Kaj la spirito levis min kaj forportis min; kaj mi iris
kun afliktita kaj maltrankvila koro; kaj la mano de
la Eternulo tenis min forte. 15 Kaj mi venis en Tel-
Abibon, al la elpelitoj, kiuj loĝis ĉe la rivero Kebar;
kaj mi haltis tie, kie ili loĝis, kaj mi restis tie inter
ili sep tagojn malĝoje. 16 Post paso de la sep tagoj
aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante: 17 Ho filo de
homo! Mi starigis vin kiel observiston super la domo
de Izrael; kaj kiam vi aŭdos vorton el Mia buŝo, tiam
instruu ilin de Mi. 18 Kiam Mi diros al la malpiulo: Vi
devas morti, kaj vi ne admonos lin, kaj vi ne parolos,
por averti malpiulon kontraŭ lia malbona vojo, por
konservi al li la vivon — tiam li, malpiulo, mortos pro
sia malpieco, sed lian sangon Mi repostulos el via
mano. 19 Sed se vi avertis malpiulon, kaj li ne returnis
sin de sia malpieco kaj de sia malbona vojo, tiam li
mortos pro sia malpieco, kaj vi estos savinta vian
animon. 20 Kaj se virtulo deturnos sin de sia virteco
kaj agos malbone, tiam Mi metos antaŭ lin falpuŝilon,
kaj li mortos; ĉar vi lin ne avertis, li mortos pro sia
peko, kaj ne estos rememorataj la bonaj agoj, kiujn li
faris; sed lian sangon Mi repostulos el via mano. 21
Sed se vi avertos virtulon, ke la virtulo ne peku, kaj li
ne pekos, tiam li restos vivanta pro tio, ke li akceptis
averton, kaj vi estos savinta vian animon. 22 Kaj venis
sur min tie la mano de la Eternulo, kaj Li diris al mi:
Leviĝu, kaj iru en la valon, kaj tie Mi parolos al vi. 23
Kaj mi leviĝis, kaj eliris en la valon; kaj jen tie staras
la majesto de la Eternulo, simile al la majesto, kiun mi
vidis ĉe la rivero Kebar. Kaj mi ĵetis min vizaĝaltere.
24 Kaj eniris en min la spirito kaj starigis min sur
miaj piedoj. Kaj Li ekparolis al mi, kaj diris al mi: Iru,
enŝlosu vin en via domo. 25 Kaj vidu, ho filo de homo,
oni metos sur vin ŝnurojn kaj ligos vin per ili, kaj vi
ne povos eliri inter ilin; 26 kaj vian langon Mi algluos
al via palato, kaj vi mutiĝos kaj ne estos admonanto
por ili; ĉar ili estas domo malobeema. 27 Sed kiam
Mi ekparolos al vi, Mi malfermos vian buŝon, kaj vi
diros al ili: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Kiu volas
aŭskulti, tiu aŭskultu, kaj kiu ne volas, tiu rifuzu; ĉar
ili estas domo malobeema.

4 Kaj vi, ho filo de homo, prenu al vi brikon kaj
kuŝigu ĝin antaŭ vi, kaj desegnu sur ĝi urbon,
nome Jerusalemon. 2 Kaj faru ĉirkaŭ ĝi sieĝon,
aranĝu kontraŭ ĝi bastionon, surŝutu kontraŭ ĝi
remparon, faru kontraŭ ĝi tendaron, kaj starigu ĉirkaŭ
ĝi muregrompilojn. 3 Kaj prenu al vi feran paton kaj
starigu ĝin kiel feran muron inter vi kaj la urbo, kaj
direktu vian vizaĝon kontraŭ ĝin; ĝi estu sub sieĝo,
kaj vi sieĝu ĝin. Tio estu signo por la domo de Izrael.
4 Kaj vi kuŝiĝu sur vian maldekstran flankon, kaj metu
sur ĝin la malpiecon de la domo de Izrael; dum tiom
da tagoj, kiom vi kuŝos sur ĝi, vi portos sur vi ilian

malpiecon. 5 La jarojn de ilia malpieco Mi kalkulos
al vi kiel tagojn: dum tricent naŭdek tagoj vi portos
sur vi la malpiecon de la domo de Izrael. 6 Kiam vi
tion plenumos, tiam denove kuŝiĝu sur vian dekstran
flankon, kaj portu sur vi la malpiecon de la domo de
Jehuda dum kvardek tagoj; ĉiun tagon Mi kalkulos al
vi kiel jaron. 7 Kaj kontraŭ la sieĝatan Jerusalemon
direktu vian vizaĝon kaj vian etenditan brakon, kaj
profetu kontraŭ ĝi. 8 Kaj jen Mi metos sur vin ŝnurojn,
ke vi ne povu turni vin de unu flanko sur la alian,
ĝis vi finos la tagojn de via sieĝado. 9 Kaj prenu al vi
tritikon kaj hordeon, fabojn kaj lentojn, milion kaj
spelton, kaj ŝutu tion en unu vazon, kaj faru al vi el
tio panon laŭ la nombro de la tagoj, dum kiuj vi kuŝos
sur via flanko: dum tricent naŭdek tagoj manĝu ĝin.
10 Kaj vian manĝaĵon, kiun vi manĝos, uzu laŭpeze,
po dudek sikloj ĉiutage; de tempo al tempo manĝu
ĝin. 11 Kaj akvon trinku laŭmezure, po sesono de hino
trinku de tempo al tempo. 12 En formo de hordeaj
platkukoj manĝu tion, kaj sur ekskrementoj de homoj
baku ilin antaŭ iliaj okuloj. 13 Kaj la Eternulo diris:
Tiele la Izraelidoj manĝados sian panon malpure inter
la popoloj, al kiuj Mi ilin dispelos. 14 Kaj mi diris: Ho
Sinjoro, ho Eternulo! jen mia animo ne malpuriĝis,
kadavraĵon aŭ disŝiritaĵon mi ne manĝis de mia juneco
ĝis nun, kaj nenia abomeninda viando eniris iam en
mian buŝon. 15 Kaj Li diris al mi: Jen Mi permesas al vi
uzi ekskrementojn de brutoj anstataŭ ekskrementoj
de homoj, kaj sur ili pretigu vian panon. 16 Kaj Li
diris al mi: Ho filo de homo! jen Mi rompos la panan
apogon en Jerusalem, kaj oni manĝos panon laŭpeze
kaj en zorgoj, kaj akvon oni trinkos laŭmezure kaj
kun afliktoj; 17 ĉar mankos al ili pano kaj akvo, kaj ili
kun teruro rigardos unu la alian, kaj ili konsumiĝos
pro sia malpieco.

5 Kaj vi, ho filo de homo, prenu al vi glavon akran,
kiel razilo de barbiroj, prenu ĝin al vi, kaj pasigu
ĝin sur via kapo kaj sur via barbo, kaj prenu al vi
pesilon, kaj disdividu la harojn: 2 trionon forbruligu
meze de la urbo, kiam finiĝos la tagoj de la sieĝado;
trionon prenu, kaj dishaku ĝin per la glavo en la
ĉirkaŭaĵo de la urbo; kaj trionon disblovu en la venton,
kaj Mi elingigos post ili la glavon. 3 Kaj prenu el tio
malgrandan kvanton, kaj ligu ĝin en la randon de
via vesto. 4 Kaj ankoraŭ iom prenu el tio, kaj ĵetu en
fajron, kaj forbruligu ilin per fajro; el tie eliros fajro
sur la tutan domon de Izrael. 5 Tiele diras la Sinjoro,
la Eternulo: Jen estas Jerusalem; Mi starigis ĝin meze
de la nacioj, kaj ĉirkaŭ ĝi estas diversaj landoj. 6 Sed
ĝi agis kontraŭ Miaj decidoj pli malpie, ol la nacioj, kaj
kontraŭ Miaj leĝoj pli malbone, ol la landoj, kiuj estas
ĉirkaŭ ĝi; ĉar ili malestimis Miajn decidojn, kaj Miajn
leĝojn ili ne sekvis. 7 Tial tiele diras la Sinjoro, la
Eternulo: Ĉar via amaso estas pli malbona, ol la nacioj,
kiuj estas ĉirkaŭ vi, ĉar Miajn leĝojn vi ne sekvis kaj
Miajn decidojn vi ne plenumis, kaj vi ne agis eĉ laŭ la
justeco de la nacioj, kiuj estas ĉirkaŭ vi, 8 tial tiele
diras la Sinjoro, la Eternulo: Jen Mi ankaŭ iros kontraŭ
vin, kaj Mi faros inter vi juĝon antaŭ la okuloj de
la nacioj. 9 Kaj Mi agos kun vi tiel, kiel Mi neniam
agis kaj kiel Mi neniam plu agos simile, pro ĉiuj viaj
abomenindaĵoj. 10 Tial gepatroj manĝos gefilojn inter
vi, kaj gefiloj manĝos siajn gepatrojn; kaj Mi faros
kontraŭ vi juĝon, kaj Mi disblovos vian tutan restaĵon
al ĉiuj ventoj. 11 Tial, kiel Mi vivas, diras la Sinjoro, la
Eternulo, pro tio, ke vi malpurigis Mian sanktejon per
ĉiuj viaj abomenindaĵoj kaj per ĉiuj viaj fiaĵoj, Mi vin
malgrandigos, kaj Mia okulo ne indulgos, kaj Mi ne
kompatos. 12 Triono el vi mortos de pesto kaj pereos
de malsato meze de vi; triono falos de glavo en viaj
ĉirkaŭaĵoj; kaj trionon Mi dispelos al ĉiuj ventoj, kaj
Mi elingigos post ili la glavon. 13 Mi plene agigos Mian
koleron, kaj Mi ripozigos Mian indignon sur ili, kaj Mi
faros al Mi kontentecon, por ke ili eksciu, ke Mi, la
Eternulo, parolis en Mia fervoro, kiam Mi konsumos
Mian koleron sur ili. 14 Kaj Mi vin dezertigos kaj
hontigos inter la nacioj, kiuj estas ĉirkaŭ vi, antaŭ
la okuloj de ĉiu pasanto. 15 Kaj vi estos hontindaĵo
kaj mokataĵo, ekzemplo kaj teruro por la nacioj, kiuj
estas ĉirkaŭ vi, kiam Mi faros kontraŭ vi juĝon en
kolero kaj indigno kaj kun indigna moralinstruo. Mi,
la Eternulo, tion diris. 16 Kiam Mi ĵetos sur ilin Miajn
kruelajn sagojn de malsato, kiuj estos pereigaj kaj
kiujn Mi sendos por ekstermado, tiam Mi faros ĉe vi
la malsaton ĉiam pli granda, kaj Mi rompos ĉe vi la
panan apogon. 17 Mi sendos sur vin malsaton, kaj
sovaĝajn bestojn, kiuj faros vin seninfanaj; kaj pesto
kaj sangoverŝado trairos vin, kaj glavon Mi venigos
sur vin. Mi, la Eternulo, tion diris.

6 Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante:
2 Ho filo de homo, direktu vian vizaĝon al la
montoj de Izrael, kaj profetu pri ili; 3 kaj diru: Ho

montoj de Izrael, aŭskultu la vorton de la Sinjoro,
la Eternulo: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo, al la
montoj kaj al la montetoj, al la intermontoj kaj al la
valoj: Jen Mi venigos sur vin glavon, kaj Mi detruos
viajn altaĵojn. **4** Kaj dezertigitaj estos viaj altaroj,
kaj rompitaj estos viaj sunkolonoj; kaj Mi faligos
viajn mortigitojn antaŭ viaj idoloj. **5** Kaj Mi faligos la
kadavrojn de la Izraelidoj antaŭ iliaj idoloj, kaj Mi
disĵetos viajn ostojn ĉirkaŭ viaj altaroj. **6** En ĉiuj viaj
loĝlokoj la urboj estos ruinigitaj kaj la altaĵoj estos
dezertigitaj, por ke estu ruinigitaj kaj dezertigitaj
viaj altaroj, por ke estu rompitaj kaj detruitaj viaj
idoloj, viaj sunkolonoj estu disbatitaj, kaj viaj faritaĵoj
estu ekstermitaj. **7** Kaj falos mortigitoj inter vi, kaj
tiam vi ekscios, ke Mi estas la Eternulo. **8** Sed Mi
restigos al vi kelkan kvanton, kiu saviĝos de la glavo
inter la nacioj, kiam vi estos disĵetitaj en la landojn.
**9** Kaj viaj saviĝintoj rememoros Min inter la nacioj,
kien ili estos forkondukitaj, kiam Mi disbatos ilian
malĉastan koron, kiu defalis de Mi, kaj iliajn okulojn,
kiuj malĉastis kun siaj idoloj; kaj ili mem pentos pri la
malbonagoj, kiujn ili faris per ĉiuj siaj abomenindaĵoj.
**10** Kaj ili ekscios, ke Mi, la Eternulo, ne vane diris, ke
Mi faros al ili tiun malbonon. **11** Tiele diras la Sinjoro,
la Eternulo: Plaŭdu per viaj manoj, frapu per via
piedo, kaj diru: Ve pro ĉiuj malbonaj abomenindaĵoj
de la domo de Izrael, pro kiuj ili falos de glavo, de
malsato, kaj de pesto. **12** Kiu estas malproksime, tiu
mortos de pesto; kiu estas proksime, tiu falos de glavo;
kiu restis kaj konserviĝis, tiu mortos de malsato. Tiel
Mi konsumos Mian koleron sur ili. **13** Kaj vi ekscios, ke
Mi estas la Eternulo, kiam iliaj mortigitoj kuŝos inter
siaj idoloj ĉirkaŭ iliaj altaroj sur ĉiu alta monteto, sur
ĉiuj suproj de la montoj, sub ĉiu verda arbo, kaj sub
ĉiu densfolia kverko, tie, kie ili faradis bonodorajn
incensojn al ĉiuj siaj idoloj. **14** Kaj Mi etendos Mian
manon sur ilin, kaj en ĉiuj iliaj loĝlokoj Mi dezertigos
la teron pli ol en la dezerto Dibla; kaj ili ekscios, ke Mi
estas la Eternulo.

**7** Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante: **2**
Ho filo de homo, tiele diras la Sinjoro, la Eternulo,
pri la tero de Izrael: Fino venis, la fino por ĉiuj kvar
randoj de la lando. **3** Nun venos al vi la fino; kaj
Mi sendos sur vin Mian koleron, kaj Mi juĝos vin
laŭ via konduto, kaj Mi metos sur vin ĉiujn viajn
abomenindaĵojn. **4** Ne indulgos vin Mia okulo, kaj Mi
ne kompatos; ĉar vian konduton Mi rekompencos
sur vi, kaj viaj abomenindaĵoj estos meze de vi; kaj
vi ekscios, ke Mi estas la Eternulo. **5** Tiele diras la
Sinjoro, la Eternulo: Malbono, unu malbono nun
venas; **6** fino venas, venas la fino, ĝi vekiĝas kontraŭ
vin, jen ĝi venas. **7** Venas matenruĝo kontraŭ vi, ho
loĝanto de la lando; venas la tempo, proksima estas
la tago de tumulto, kiam oni ne plu kantos sur la
montoj. **8** Nun Mi baldaŭ elverŝos Mian indignon sur
vin, Mi plene kontentigos Mian koleron sur vi, Mi
juĝos vin laŭ via konduto, kaj Mi metos sur vin ĉiujn
viajn abomenindaĵojn. **9** Ne indulgos Mia okulo, kaj
Mi ne kompatos; laŭ via konduto Mi redonos al vi, kaj
viaj abomenindaĵoj estos meze de vi; kaj vi ekscios, ke
Mi, la Eternulo, estas la batanto. **10** Jen estas la tago,
jen ĝi venas, leviĝis la matenruĝo, la vergo elkreskis,
la fiero ekfloris. **11** La perforteco leviĝis kiel vergo
kontraŭ la malpiecon; nenio restos de ili, nek de ilia
amaso, nek de ilia popola bruo, neniu ĝemos ĉe ili. **12**
Venas la tempo, alproksimiĝas la tago; la aĉetanto ne
ĝoju, kaj la vendanto ne malĝoju; ĉar la kolero trafis
ilian tutan amason. **13** Ĉar la vendanto ne plu revenos
al la venditaĵo, eĉ se ili ankoraŭ estus vivantaj; ĉar
la vizio pri ilia tuta amaso ne retiriĝos, kaj neniu
fortikigos sian vivon per sia malpieco. **14** Eksonigu la
trumpeton, kaj ĉiu armiĝu; neniu tamen iros en la
militon, ĉar Mia kolero estas super ilia tuta amaso. **15**
La glavo estas ekstere, la pesto kaj la malsato interne;
kiu estas sur la kampo, tiu mortos de la glavo, kaj kiu
estas en la urbo, tiun ekstermos malsato kaj pesto.
**16** Kaj tiuj el ili, kiuj forsaviĝos, estos sur la montoj,
kiel kolomboj el la valoj, ĉiuj ili ĝemos, ĉiu pro siaj
malbonagoj. **17** Ĉiuj manoj malleviĝos senforte, kaj
ĉiuj genuoj moviĝos kiel akvo. **18** Ili zonos sin per
sakaĵo; teruro ilin kovros; sur ĉiu vizaĝo estos honto,
kaj ĉiuj kapoj estos senharaj. **19** Sian arĝenton ili
ĵetos sur la stratojn, kaj ilia oro fariĝos malpuraĵo; ilia
arĝento kaj ilia oro ne povos savi ilin en la tago de la
kolero de la Eternulo, ne satigos ilian animon, kaj ne
plenigos ilian internaĵon; ĉar tio estis instigilo por
iliaj malbonagoj. **20** Sian plej belan ornamon ili faris
objekto de fiereco, siajn abomenindajn statuojn kaj
idolojn ili starigis en ĝi; tial Mi faros ĝin malpuraĵo
por ili. **21** Kaj Mi transdonos ĝin en la manojn de
fremduloj por disrabi, kaj al la malpiuloj de la tero kiel
militakiron, kaj ili malsanktigos ĝin. **22** Mi deturnos
Mian vizaĝon de ili, por ke ili malsanktigu Mian

misterejon; kaj rabistoj tien venos kaj malsanktigos
ĝin. 23 Faru ĉenon; ĉar la lando estas plena de sangaj
krimoj kaj la urbo estas plena de perforteco. 24 Mi
venigos la plej malbonajn el la nacioj, kaj ili ekposedos
iliajn domojn; Mi neniigos la fierecon de la fortuloj,
kaj iliaj sanktaĵoj estos malsanktigitaj. 25 Pereo venas;
oni serĉos pacon, sed ne trovos ĝin. 26 Malfeliĉo post
malfeliĉo venos, sciigo post sciigo; oni serĉos vizion ĉe
profeto; malaperos la instruo ĉe la pastro, kaj konsilo
ĉe la maljunuloj. 27 La reĝo malĝojos, la princo estos
kovrita de teruro, kaj la manoj de la simpla popolo
malkuraĝiĝos. Laŭ ilia konduto Mi agos kun ili, laŭ
iliaj meritoj Mi juĝos ilin; kaj ili ekscios, ke Mi estas la
Eternulo.

**8** En la sesa jaro, en la kvina tago de la sesa monato,
mi sidis en mia domo, kaj la plejaĝuloj de Jehuda
sidis antaŭ mi; kaj falis sur min la mano de la Sinjoro,
la Eternulo. 2 Kaj mi vidis, jen estas bildo, kiu aspektas
kiel fajro; de la bildo de liaj lumboj malsupren estis
fajro, kaj supre de liaj lumboj estis hela brilo, tre
hela lumo. 3 Kaj li etendis la bildon de mano, kaj
kaptis min je la bukloj de mia kapo; kaj la spirito
ekportis min inter la tero kaj la ĉielo, kaj venigis
min en Dia vizio en Jerusalemon, al la enirejo de la
interna pordego, turnita al nordo, kie staris statuo
de koleriga ĵaluzo. 4 Kaj jen tie estas la majesto de
Dio de Izrael, simile al la vizio, kiun mi vidis en la
valo. 5 Kaj Li diris al mi: Ho filo de homo, levu viajn
okulojn en la direkto al nordo! Kaj mi levis miajn
okulojn en la direkto al nordo, kaj jen norde de la
pordego de la altaro, ĉe la enirejo, staras tiu statuo
de ĵaluzo. 6 Kaj Li diris al mi: Ho filo de homo, ĉu
vi vidas, kion ili faras? la grandajn abomenindaĵojn,
kiujn la domo de Izrael faras ĉi tie, por malproksimigi
Min de Mia sanktejo? sed vi ankoraŭ denove vidos
grandajn abomenindaĵojn. 7 Kaj Li venigis min al la
enirejo de la korto, kaj mi ekvidis, ke jen estas unu
truo en la muro. 8 Kaj Li diris al mi: Ho filo de homo,
trafosu la muron. Kaj mi trafosis la muron, kaj jen
estas ia pordo. 9 Kaj Li diris al mi: Eniru, kaj rigardu
la malbonajn abomenindaĵojn, kiujn ili faras ĉi tie. 10
Kaj mi eniris kaj ekrigardis, kaj jen diversaj bildoj de
rampaĵoj kaj abomenindaj brutoj kaj diversaj idoloj de
la domo de Izrael estas skulptitaj sur la muro ĉirkaŭe,
sur ĉiuj flankoj. 11 Kaj antaŭ ili staras sepdek viroj
el la plejaĝuloj de la domo de Izrael, kaj Jaazanja,
filo de Ŝafan, staras meze de ili; kaj ĉiu havas en la
mano sian incensilon, kaj de la incensoj leviĝas densa
nubo. 12 Kaj Li diris al mi: Ho filo de homo, ĉu vi
vidas, kion la plejaĝuloj de la domo de Izrael faras
en mallumo, ĉiu en sia ĉambro de pentraĵoj? Ĉar ili
diras: La Eternulo ne vidas nin, la Eternulo forlasis
la landon. 13 Kaj Li diris al mi: Vi denove ankoraŭ
vidos grandajn abomenindaĵojn, kiujn ili faras. 14
Kaj Li venigis min al la enirejo de la norda pordego
de la domo de la Eternulo, kaj jen tie sidas virinoj,
kiuj ploras pri Tamuz. 15 Kaj Li diris al mi: Ĉu vi
vidas, ho filo de homo? vi vidos ankoraŭ pli grandajn
abomenindaĵojn ol tiuj. 16 Kaj Li venigis min en la
internan korton de la domo de la Eternulo, kaj jen
ĉe la enirejo de la templo de la Eternulo, inter la
portiko kaj la altaro, staras ĉirkaŭ dudek kvin homoj,
kun la dorso al la templo de la Eternulo kaj kun la
vizaĝo al la oriento, kaj adorkliniĝas orienten, al la
suno. 17 Kaj Li diris al mi: Ĉu vi vidas, ho filo de
homo? ĉu ne sufiĉas al la domo de Jehuda, ke ili faras
la abomenindaĵojn, kiujn ili faras ĉi tie? ili ankoraŭ
plenigis la landon per perforteco, kaj ripete kolerigas
Min; kaj jen ili direktas la vergon al sia vizaĝo. 18 Tial
Mi ankaŭ agos en kolero; ne indulgos Mia okulo, kaj
Mi ne kompatos; eĉ se ili krios al Miaj oreloj per laŭta
voĉo, Mi ne aŭskultos ilin.

**9** Kaj Li vokis al miaj oreloj per laŭta voĉo, dirante:
Alproksimiĝu la punantoj de la urbo, kaj ĉiu havu
en sia mano sian pereigilon. 2 Kaj jen ses homoj venis
per la vojo de la supra pordego, kiu estas turnita
norden, kaj ĉiu havis en la mano sian detruilon, kaj
inter ili estis unu vestita per tolo, kaj li havis skribilon
ĉe siaj lumboj. Ili venis, kaj stariĝis apud la kupra
altaro. 3 Kaj la majesto de Dio de Izrael leviĝis de la
kerubo, sur kiu ĝi estis, al la sojlo de la domo. Kaj Li
alvokis la homon, kiu estis vestita per tolo kaj havis
skribilon ĉe siaj lumboj. 4 Kaj la Eternulo diris al li:
Trairu la urbon Jerusalem, kaj marku per litero Tav la
fruntojn de tiuj homoj, kiuj ĝemas kaj malĝojas pri
ĉiuj abomenindaĵoj, kiuj estas farataj en la urbo. 5
Kaj al la aliaj Li diris tiel, ke mi povis aŭdi: Iru tra la
urbo post li, kaj frapu; via okulo ne indulgu, kaj vi ne
kompatu. 6 Maljunulon, junulon, junulinon, infanojn,
kaj virinojn eksterme mortigu; sed ĉiun homon, sur
kiu estas la litero Tav, ne tuŝu; kaj komencu de Mia
sanktejo. Kaj ili komencis de la maljunaj homoj, kiuj

estis antaŭ la domo. **7** Kaj Li diris al ili: Malpurigu la
domon, kaj plenigu la kortojn per mortigitoj; eliru!
Kaj ili eliris, kaj komencis frapadi en la urbo. **8** Kiam
ili finis la mortigadon kaj mi restis, tiam mi ĵetis min
vizaĝaltere, ekkriis, kaj diris: Ho Sinjoro, ho Eternulo!
ĉu Vi ekstermos la tutan restaĵon de Izrael, elverŝante
Vian koleron sur Jerusalemon? **9** Kaj Li diris al mi: La
malpieco de la domo de Izrael kaj de Jehuda estas
tre, tre granda, kaj la lando estas plena de sango, kaj
la urbo estas plena de maljusteco; ĉar ili diras: La
Eternulo forlasis la landon, kaj la Eternulo ne vidas.
**10** Tial ankaŭ Miaflanke Mia okulo ne indulgos, kaj Mi
ne kompatos; ilian agadon Mi metos sur ilian kapon.
**11** Kaj jen la viro, kiu estis vestita per tolo kaj havis
skribilon ĉe siaj lumboj, alportis respondon, dirante:
Mi faris tion, kion Vi ordonis al mi.

**10** Kaj mi vidis: jen sur la firmamento, kiu estis
super la kapoj de la keruboj, io simila al safiro,
aspektanta kiel bildo de trono, aperis super ili. **2** Kaj
Li diris al la viro, vestita per tolo, jene: Eniru inter
la radojn sub la kerubon, kaj prenu plenmanojn da
ardantaj karboj el inter la keruboj, kaj ĵetu ilin sur la
urbon. Kaj li eniris antaŭ miaj okuloj. **3** La keruboj
staris dekstre de la domo, kiam la viro eniris, kaj nubo
plenigis la internan korton. **4** Kaj leviĝis la majesto de
la Eternulo de la kerubo al la enirejo de la domo, kaj
la domo pleniĝis de la nubo, kaj la korto pleniĝis de
brilo de la majesto de la Eternulo. **5** Kaj bruo de la
flugiloj de la keruboj estis aŭdata ĝis la ekstera korto,
kiel bruo de Dio, la Plejpotenculo, kiam Li parolas. **6**
Kaj kiam Li ordonis al la viro, vestita per tolo, dirante:
Prenu fajron el inter la radoj, el inter la keruboj, kaj ĉi
tiu eniris kaj stariĝis apud la rado, **7** tiam unu el la
keruboj etendis sian manon el inter la keruboj al la
fajro, kiu estis inter la keruboj, kaj prenis kaj metis
sur la manplatojn de la tolvestito; kaj ĉi tiu prenis kaj
eliris. **8** Kaj ĉe la keruboj montriĝis similaĵo de homa
mano sub iliaj flugiloj. **9** Kaj mi vidis, jen estas kvar
radoj apud la keruboj, po unu rado apud ĉiu kerubo,
kaj la aspekto de la radoj estis kiel turkiso. **10** Kaj
laŭ aspekto la kvar radoj havis unu formon, kvazaŭ
unu rado estus en la alia. **11** Irante, ili moviĝadis sur
ĉiujn kvar flankojn, ili ne deturniĝadis dum la irado;
al la loko, al kiu estis direktita la kapo, ili sekvadis
ĝin, ili ne deturniĝadis dum la irado. **12** Kaj ilia tuta
korpo, ilia dorso, iliaj manoj, iliaj flugiloj, kiel ankaŭ
la radoj, estis ĉirkaŭe plenaj de okuloj; ĉiuj kvar havis
siajn radojn. **13** La radoj estis nomataj turnovento,
kiel mi povis tion aŭdi. **14** Ĉiu havis kvar vizaĝojn:
unu vizaĝo estis vizaĝo de kerubo, la dua vizaĝo estis
vizaĝo de homo, la tria estis vizaĝo de leono, kaj la
kvara estis vizaĝo de aglo. **15** Kaj leviĝis la keruboj.
Tio estis tiu kreitaĵo, kiun mi vidis ĉe la rivero Kebar.
**16** Kaj kiam la keruboj iris, la radoj iradis apud ili; kaj
kiam la keruboj levis siajn flugilojn, por leviĝi de la
tero, tiam ankaŭ la radoj ne deturniĝadis de ili. **17**
Kiam tiuj staris, ili ankaŭ staris, kaj kiam tiuj leviĝis,
ili ankaŭ leviĝadis; ĉar la spirito de la kreitaĵoj estis
en ili. **18** Kaj la majesto de la Eternulo foriĝis de la
sojlo de la domo kaj stariĝis super la keruboj. **19** Kaj
la keruboj levis siajn flugilojn, kaj suprenflugis de la
tero antaŭ miaj okuloj, kaj la radoj kune kun ili; kaj ili
stariĝis ĉe la enirejo de la orienta pordego de la domo
de la Eternulo; kaj la majesto de Dio de Izrael aperis
supre super ili. **20** Tio estis la kreitaĵo, kiun mi vidis
sub Dio de Izrael ĉe la rivero Kebar; kaj mi eksciis, ke
tio estas keruboj. **21** Ĉiu el ili havis kvar vizaĝojn, kaj
ĉiu havis kvar flugilojn, kaj similaĵo de homaj manoj
estis sub iliaj flugiloj. **22** Kaj la aspekto de iliaj vizaĝoj
estis kiel tiuj vizaĝoj, kiujn mi vidis ĉe la rivero Kebar,
ilia aspekto kaj ili mem. Ĉiu moviĝis laŭ la direkto de
sia vizaĝo.

**11** Kaj levis min la spirito, kaj venigis min al la
orienta pordego de la domo de la Eternulo, al
tiu, kiu rigardas orienten. Kaj jen ĉe la enirejo de
la pordego staras dudek kvin homoj, kaj inter ili mi
vidas Jaazanjan, filon de Azur, kaj Pelatjan, filon de
Benaja, estrojn de la popolo. **2** Kaj Li diris al mi: Ho
filo de homo, ĉi tiuj homoj havas malpiajn intencojn
kaj donas malbonajn konsilojn en ĉi tiu urbo. **3** Ili
diras: Ankoraŭ ne baldaŭ; ni konstruu domojn; ĝi
estas la kaldrono, kaj ni estas la viando. **4** Tial profetu
pri ili, profetu, ho filo de homo. **5** Kaj malleviĝis sur
min la spirito de la Eternulo, kaj diris al mi: Diru:
Tiele diras la Eternulo: Tiel vi parolis, ho domo de
Izrael, kaj la pensojn de via koro Mi scias. **6** Multajn vi
mortigis en ĉi tiu urbo, kaj ĝiajn stratojn vi plenigis
per mortigitoj. **7** Tial tiele diras la Sinjoro, la Eternulo:
Viaj mortigitoj, kiujn vi faligis en ĝi, estas la viando,
kaj ĝi mem estas la kaldrono; sed vi estos elkondukitaj
el ĝi. **8** Glavon vi timas, kaj glavon Mi venigos sur vin,
diras la Sinjoro, la Eternulo. **9** Mi elkondukos vin el ĝi

kaj transdonos vin en la manojn de fremduloj, kaj Mi
faros super vi juĝon. 10 De glavo vi falos; ĉe la limoj
de Izrael Mi juĝos vin; kaj vi ekscios, ke Mi estas la
Eternulo. 11 La urbo ne estos por vi kaldrono, nek vi
estos en ĝi kiel viando; ĉe la limoj de Izrael Mi juĝos
vin. 12 Kaj vi ekscios, ke Mi estas la Eternulo, kies
leĝojn vi ne sekvis kaj kies decidojn vi ne plenumis,
sed vi agis laŭ la maniero de la nacioj, kiuj estas
ĉirkaŭ vi. 13 Kiam mi eldiris mian profetaĵon, Pelatja,
filo de Benaja, mortis; kaj mi ĵetis min vizaĝaltere,
kaj ekkriis per laŭta voĉo, kaj diris: Ho Sinjoro, ho
Eternulo! Vi faras finon al la restaĵo de Izrael! 14 Kaj
aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante: 15 Ho filo de
homo! al viaj fratoj, jes al viaj fratoj, al viaj parencoj,
kaj al la tuta domo de Izrael parolas la loĝantoj de
Jerusalem: Foriĝu de la Eternulo, al ni estas donita
ĉi tiu lando kiel hereda posedaĵo. 16 Tial diru: Tiele
diras la Sinjoro, la Eternulo: Kvankam Mi forigis ilin
al la nacioj kaj disĵetis ilin en diversajn landojn, Mi
tamen baldaŭ estos ilia sanktejo en la landoj, kien ili
venis. 17 Tial diru: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo:
Mi kolektos vin el inter la nacioj, Mi kolektos vin el la
landoj, kien vi estas disĵetitaj, kaj Mi donos al vi la
landon de Izrael. 18 Kaj kiam ili venos tien, ili forigos
el ĝi ĉiujn ĝiajn fiaĵojn kaj ĉiujn ĝiajn abomenindaĵojn.
19 Kaj Mi donos al ili unu koron, kaj novan spiriton
Mi enmetos en vin, kaj Mi elprenos el ilia korpo la
koron ŝtonan kaj donos al ili koron karnan, 20 por
ke ili sekvu Miajn leĝojn kaj observu Miajn decidojn
kaj plenumu ilin; kaj ili estos Mia popolo, kaj Mi
estos ilia Dio. 21 Sed al tiuj, kiuj sin fordonas al la
fiaĵoj kaj abomenindaĵoj de sia koro, Mi turnos ilian
konduton kontraŭ ilian kapon, diras la Sinjoro, la
Eternulo. 22 Tiam la keruboj levis siajn flugilojn, kaj la
radoj estis apud ili; kaj la majesto de Dio de Izrael
estis supre super ili. 23 Kaj la majesto de la Eternulo
leviĝis el meze de la urbo, kaj haltis sur la monto, kiu
estas oriente de la urbo. 24 Kaj la spirito min levis,
kaj venigis min en la vizio kaj en la inspiro de Dio
en Ĥaldeujon, al la forkondukitoj. Kaj malaperis de
mi la vizio, kiun mi vidis. 25 Kaj mi rakontis al la
forkondukitoj ĉiujn vortojn de la Eternulo, kiujn Li
aperigis al mi.

**12** Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante:
2 Ho filo de homo! meze de domo malobeema vi
loĝas; ili havas okulojn, por vidi, sed ili ne vidas; ili
havas orelojn, por aŭdi, sed ili ne aŭdas; ĉar ili estas
domo malobeema. 3 Tial, ho filo de homo, faru al vi
objektojn de migrado, kaj migru tage antaŭ iliaj okuloj,
formigru antaŭ iliaj okuloj el via loko en alian lokon;
eble ili vidos, ke ili estas domo malobeema. 4 Kaj
elportu viajn necesaĵojn, kaj necesaĵojn de migranto,
tage antaŭ iliaj okuloj; kaj vi mem eliru antaŭ iliaj
okuloj vespere, kiel eliras migrantoj. 5 Antaŭ iliaj
okuloj trabatu al vi aperturon en la muro kaj eliru
tra ĝi. 6 Antaŭ iliaj okuloj metu la necesaĵojn sur la
ŝultron, elportu ilin en mallumo, kovru vian vizaĝon,
por ke vi ne vidu la teron; ĉar Mi faris vin antaŭsigno
por la domo de Izrael. 7 Kaj mi agis tiel, kiel estis
ordonite al mi: miajn necesaĵojn mi elportis, kiel
necesaĵojn de migranto, ĉe la taglumo; kaj vespere
mi trabatis al mi per la mano aperturon en la muro,
en mallumo mi elportis, kaj levis sur mian ŝultron
antaŭ iliaj okuloj. 8 Kaj matene aperis al mi vorto de
la Eternulo, dirante: 9 Ho filo de homo! ĉu la domo de
Izrael, la domo malobeema, ne demandis vin, kion vi
faras? 10 Diru al ili: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo:
Ĉi tiu portaĵo koncernas la princon de Jerusalem, kaj
la tutan domon de Izrael, kiu estas en ĝi. 11 Diru: Mi
estas via antaŭsigno: kiel mi agis, tiel oni agos kun ili:
en elhejmiĝon, en kaptitecon ili iros. 12 Kaj la princo,
kiu estas inter ili, en mallumo prenos siajn aĵojn
sur la ŝultron kaj eliros; oni trarompos en la muro
aperturon, por elkonduki lin; li kovros sian vizaĝon,
por ke li ne vidu per la okulo la teron. 13 Kaj Mi
sternos Mian reton kontraŭ li, kaj li estos kaptita en
Mian kaptilon, kaj Mi forkondukos lin en Babelon, en
la landon de la Ĥaldeoj; sed li ĝin ne vidos, kvankam
tie li mortos. 14 Kaj ĉiujn liajn ĉirkaŭantojn, liajn
helpantojn, kaj ĉiujn liajn taĉmentojn Mi dispelos al
ĉiuj ventoj, kaj Mi elingigos post ili glavon. 15 Kaj
ili ekscios, ke Mi estas la Eternulo, kiam Mi dispelos
ilin inter la naciojn kaj disĵetos ilin en la landojn.
16 Sed malgrandan nombron el ili Mi restigos de la
glavo, malsato, kaj pesto, por ke ili rakontu pri ĉiuj
siaj abomenindaĵoj, inter la nacioj, al kiuj ili venos; kaj
oni ekscios, ke Mi estas la Eternulo. 17 Kaj aperis al
mi vorto de la Eternulo, dirante: 18 Ho filo de homo!
manĝu vian panon kun tremo, kaj trinku vian akvon
kun ĉagreno kaj zorgoj. 19 Kaj diru al la popolo de
la lando: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo, pri la
loĝantoj de Jerusalem, pri la lando de Izrael: Sian
panon ili manĝos en zorgoj, kaj sian akvon ili trinkos

en teruro; ĉar la lando dezertiĝos de sia abundo pro
la maljustaĵoj de ĉiuj siaj loĝantoj. 20 Kaj la loĝataj
urboj estos ruinigitaj, kaj la lando estos dezertigita;
kaj vi ekscios, ke Mi estas la Eternulo. 21 Kaj aperis
al mi vorto de la Eternulo, dirante: 22 Ho filo de
homo! kian proverbon vi havas en la lando de Izrael,
dirantan: Pasos multe da tempo, kaj ĉiu antaŭdiro
malaperos? 23 Tial diru al ili: Tiele diras la Sinjoro,
la Eternulo: Mi neniigos ĉi tiun proverbon, kaj oni
ne plu uzos tian proverbon en Izrael; sed diru al ili:
Proksima jam estas la tempo kaj la plenumiĝo de ĉiu
antaŭdiro. 24 Ĉar neniu profetaĵo estos plu vana, kaj
neniu antaŭdiro estos dusenca en la domo de Izrael.
25 Ĉar Mi, la Eternulo, parolas; kaj vorto, kiun Mi
parolas, plenumiĝos, ne plu estos prokrastata; en via
tempo, ho domo malobeema, Mi parolas vorton, kaj
Mi ĝin plenumos, diras la Sinjoro, la Eternulo. 26 Kaj
aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante: 27 Ho filo
de homo! jen la domo de Izrael diras: La profetaĵo,
kiun li profetas, venos ankoraŭ post longa tempo; pri
tempoj malproksimaj li profetas. 28 Tial diru al ili:
Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Neniu el Miaj vortoj
plu prokrastiĝos; vorto, kiun Mi diros, plenumiĝos,
diras la Sinjoro, la Eternulo.

**13** Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante:
2 Ho filo de homo! profetu pri la profetoj de
Izrael, kiuj profetas, kaj diru al tiuj, kiuj profetas
laŭ sia propra bontrovo: Aŭskultu la vorton de la
Eternulo! 3 Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Ve al la
senprudentaj profetoj, kiuj gvidas sin per sia propra
spirito kaj nenion vidis! 4 Kiel vulpoj kaj ruinoj estas
viaj profetoj, ho Izrael. 5 Vi ne eliras al la breĉoj, nek
baras baron ĉirkaŭ la domo de Izrael, por stari en
la batalo en la tago de la Eternulo. 6 Ilia vizio estas
senenhava, ilia antaŭdiro estas mensogo. Ili diras: La
Eternulo diris — sed la Eternulo ilin ne sendis; kaj ili
asertas, ke ilia vorto plenumiĝos. 7 Vi vidis ja vizion
senenhavan, kaj vi eldiras antaŭdiron mensogan;
vi diras: Tiel parolas la Eternulo — kvankam Mi ne
parolis. 8 Tial tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Pro
tio, ke vi predikas senbaze kaj antaŭdiras malveraĵon,
jen Mi iras kontraŭ vin, diras la Sinjoro, la Eternulo. 9
Kaj Mia mano estos kontraŭ la profetoj, kiuj profetas
senbaze kaj antaŭdiras malveraĵon; en la konsilo de
Mia popolo ili ne estos, kaj en la registro de la domo
de Izrael ili ne estos enskribitaj, kaj en la landon
de Izrael ili ne venos; kaj vi ekscios, ke Mi estas la
Sinjoro, la Eternulo. 10 Pro tio, ĝuste pro tio, ke ili
erarigas Mian popolon, antaŭdirante pacon, kvankam
paco ne estos, kaj kiam la popolo konstruas barilon,
ili ŝmiras ĝin per maltaŭga mortero — 11 diru al tiuj,
kiuj ŝmiras per maltaŭga mortero, ke ĝi defalos; estos
pluvego, kaj vi, ŝtonoj de grandega hajlo, falos sur
ĝin, kaj forta vento ĝin krevigos. 12 Kaj jen la muro
falis; ĉu oni ne diros al vi: Kie estas la mortero, per
kiu vi ŝmiris? 13 Tial tiele diras la Sinjoro, la Eternulo:
Mi elpuŝos fortan venton en Mia indigno kaj pluvegon
en Mia kolero kaj ŝtonojn de hajlo en Mia furiozo, por
ĉion ekstermi. 14 Mi detruos la muron, kiun vi ŝmiris
per maltaŭga mortero, Mi disŝutos ĝin sur la teron
tiel, ke nudiĝos ĝia fundamento; kaj ĝi disfalos, kaj
vi pereos meze de ĝi; kaj vi ekscios, ke Mi estas la
Eternulo. 15 Kaj Mi plene kontentigos Mian koleron
sur la muro, kaj sur tiuj, kiuj ŝmiris ĝin per maltaŭga
mortero, kaj Mi diros al vi: Jam ne ekzistas la muro,
kaj jam ne ekzistas tiuj, kiuj ŝmiris ĝin. 16 Tiaj estas
la profetoj de Izrael, kiuj profetas pri Jerusalem, kaj
predikas al ĝi vizion pri paco, kvankam paco ne estos,
diras la Sinjoro, la Eternulo. 17 Kaj vi, ho filo de
homo, direktu vian vizaĝon al la filinoj de via popolo,
kiuj profetas laŭ elpenso de sia koro; kaj profetu pri
ili, 18 kaj diru: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Ve
al tiuj, kiuj kudras kusenojn sub ĉiujn kubutojn kaj
faras kaptukojn por kapoj de ĉia alteco, por kapti
animojn! kaptante la animojn de Mia popolo, vi volas
konservi viajn animojn. 19 Kaj vi malsanktigas Min
antaŭ Mia popolo pro plenmano da hordeo kaj pro
peco da pano, mortigante animojn, kiuj ne devas
morti, kaj konservante la vivon al tiaj animoj, kiuj ne
devas vivi, mensogante al Mia popolo, kiu volonte
aŭskultas mensogon. 20 Tial tiele diras la Sinjoro,
la Eternulo: Jen Mi iros kontraŭ viajn kusenojn, per
kiuj vi kaptas tie la animojn flugemajn, Mi elŝiros ilin
el viaj brakoj, kaj forliberigos la animojn, kiujn vi
allogas, ke ili flugu. 21 Kaj Mi disŝiros viajn kaptukojn,
kaj savos Mian popolon el viaj manoj, kaj ili ne plu
estos kaptotaĵo por viaj manoj; kaj vi ekscios, ke Mi
estas la Eternulo. 22 Ĉar vi mensoge afliktas la koron
de virtulo, kiun Mi ne afliktis, kaj vi fortigas la manojn
de malvirtulo, por ke li ne returnu sin de sia malbona
vojo, per kio li konservus sian vivon — 23 tial vi ne plu
havos senbazajn viziojn kaj ne faros antaŭdirojn; kaj

Mi savos Mian popolon el viaj manoj; kaj vi ekscios,
ke Mi estas la Eternulo.

**14** Venis al mi kelkaj el la plejaĝuloj de Izrael, kaj
sidiĝis antaŭ mi. 2 Kaj aperis al mi vorto de la
Eternulo, dirante: 3 Ho filo de homo! ĉi tiuj homoj
levis siajn idolojn en sian koron, kaj allogilon de
sia malpieco ili starigis antaŭ sia vizaĝo; ĉu Mi nun
respondu al ili, kiam ili Min demandas? 4 Tial parolu
kun ili, kaj diru al ili: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo:
Se iu el la domo de Izrael levis siajn idolojn en sian
koron kaj starigis antaŭ si la allogilon de sia malpieco,
kaj poste venas al la profeto, tiam Mi, la Eternulo,
respondos al li tiel, kiel li meritas per sia granda
idolisteco, 5 por ke la domo de Izrael estu kaptata
konforme al sia koro, kiun ili defaligis de Mi per ĉiuj
siaj idoloj. 6 Tial diru al la domo de Izrael: Tiele diras
la Sinjoro, la Eternulo: Pentu, kaj deturnu vin de
viaj idoloj, kaj de ĉiuj viaj abomenindaĵoj deturnu
vian vizaĝon. 7 Ĉar se iu el la domo de Izrael, aŭ
el la fremduloj, kiu loĝas ĉe Izrael, defalas de Mi,
levas siajn idolojn en sian koron, starigas antaŭ sia
vizaĝo la allogilon de sia malpieco, kaj poste venas
al la profeto, por fari per li demandojn al Mi, tiam
Mi, la Eternulo, respondos al li per Mi mem; 8 Mi
direktos Mian vizaĝon kontraŭ tiun homon kaj faros
lin avertilo kaj ekzemplo, kaj Mi ekstermos lin el inter
Mia popolo; kaj vi ekscios, ke Mi estas la Eternulo.
9 Kaj se la profeto estos delogita kaj ion parolos,
tiam Mi, la Eternulo, malsaĝigis tiun profeton, kaj Mi
etendos Mian manon sur lin kaj ekstermos lin el inter
Mia popolo Izrael. 10 Tiamaniere ili estos punitaj pro
sia malpieco: la puno de la demandanto kaj la puno de
la profeto estos egalaj; 11 por ke ili ne plu forerarigu
de Mi la domon de Izrael kaj ili ne plu malpurigu sin
per ĉiuj siaj krimoj; sed ili estu Mia popolo kaj Mi estu
ilia Dio, diras la Sinjoro, la Eternulo. 12 Kaj aperis al
mi vorto de la Eternulo, dirante: 13 Ho filo de homo!
se lando pekos kontraŭ Mi, forte kulpiĝante antaŭ
Mi, tiam Mi etendos Mian manon sur ĝin, kaj rompos
al ĝi la panan apogon, venigos sur ĝin malsaton, kaj
ekstermos en ĝi la homojn kaj brutojn. 14 Kaj se meze
de ĝi troviĝus tiaj tri homoj, kiel Noa, Daniel, kaj Ijob,
ili pro sia virteco savus sian vivon, diras la Sinjoro,
la Eternulo. 15 Se Mi venigus en la landon sovaĝajn
bestojn, por ĝin senhomigi, por ke ĝi fariĝu dezerta
kaj neniu povu iri tra ĝi pro la bestoj — 16 kiel Mi
vivas, diras la Sinjoro, la Eternulo, eĉ tiuj tri homoj en
ĝi ne savus la filojn nek filinojn; nur ili mem saviĝus,
sed la lando fariĝus dezerta. 17 Aŭ se Mi venigus
glavon sur tiun landon, kaj dirus: Glavo, trairu la
landon; kaj Mi ekstermus en ĝi homojn kaj brutojn
— 18 kiel Mi vivas, diras la Sinjoro, la Eternulo, eĉ
tiuj tri homoj en ĝi ne savus la filojn nek filinojn;
nur ili mem saviĝus. 19 Aŭ se Mi venigus peston sur
tiun landon, kaj Mi elverŝus sur ĝin Mian koleron
en sango, por ekstermi en ĝi homojn kaj brutojn, 20
kaj Noa, Daniel, kaj Ijob estus en ĝi — kiel Mi vivas,
diras la Sinjoro, la Eternulo, ili ne savus filon nek
filinon; nur ili pro sia virteco savus sian animon. 21
Ĉar tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Eĉ se Mi venigus
sur Jerusalemon la kvar malbonajn punojn, la glavon,
malsaton, sovaĝajn bestojn, kaj peston, por ekstermi
en ĝi homojn kaj brutojn — 22 tamen restos en ĝi
restaĵo da mortevitintaj filoj kaj filinoj, kaj jen ili
eliros al vi, kaj vi vidos ilian konduton kaj iliajn agojn,
kaj vi konsoliĝos pri la malbono, kiun Mi venigis sur
Jerusalemon, pri ĉio, kion Mi venigis sur ĝin. 23 Kaj ili
vin konsolos, kiam vi vidos ilian konduton kaj iliajn
agojn, kaj ekscios, ke ne vane Mi faris ĉion, kion Mi
faris kontraŭ ĝi, diras la Sinjoro, la Eternulo.

**15** Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante:
2 Ho filo de homo! por kio taŭgas la ligno de
vinberbranĉo inter ĉiuj branĉoriĉaj arboj, kiuj estas
inter la arboj de arbaro? 3 Ĉu oni prenas de ĝi pecon,
por ion fari el ĝi? ĉu oni faras el ĝi almenaŭ hokon, por
pendigi sur ĝi ian objekton? 4 Jen ĝi estas transdonata
al la fajro por forbruligo; ambaŭ finojn formanĝas
la fajro, forbrulas ankaŭ la mezo; ĉu ĝi taŭgas por
laboro? 5 Jen, kiam ĝi estis ankoraŭ nedifektita, oni
ne povis ion fari el ĝi; des pli kiam la fajro ĝin difektis
kaj bruligis, ĉu oni povas ion fari el ĝi? 6 Tial tiele
diras la Sinjoro, la Eternulo: Kiel la vinberarbon inter
la arboj de la arbaro Mi transdonis al la fajro, ke ĝi ĝin
forbruligu, tiel Mi agos kun la loĝantoj de Jerusalem.
7 Mi direktos Mian vizaĝon kontraŭ ilin; el fajro ili
eliris, kaj fajro ilin ekstermos; kaj vi ekscios, ke Mi
estas la Eternulo, kiam Mi direktos Mian vizaĝon
kontraŭ ilin. 8 Kaj Mi faros la landon dezerto pro tio,
ke ili forte kulpiĝis, diras la Sinjoro, la Eternulo.

**16** Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante:
2 Ho filo de homo, montru al Jerusalem ĝiajn
abomenindaĵojn; 3 kaj diru: Tiele diras la Sinjoro, la

Eternulo, al Jerusalem: Via deveno kaj via naskiĝlando
estas en la lando Kanaana; via patro estas Amorido,
kaj via patrino estas Ĥetidino. 4 Ĉe via naskiĝo, kiam
vi estis naskita, oni ne detranĉis vian umbilikon, oni
ankaŭ ne lavis vin purige per akvo, ne frotis vin per
salo, kaj ne vindis per vindaĵoj. 5 Nenies okulo favoris
vin, por fari al vi pro kompato unu el tiuj faroj, sed
oni elĵetis vin sur la kampon pro abomeno kontraŭ
vi en la tago, kiam vi estis naskita. 6 Mi preteriris
preter vi, kaj Mi vidis, ke vi baraktas en via sango,
kaj Mi diris al vi en via sango: Vivu; jes, Mi diris al vi
en via sango: Vivu. 7 Mi grandigis vin, kiel kampan
kreskaĵon; vi fariĝis plena kaj granda, vi fariĝis tute
bela; viaj mamoj formiĝis, viaj haroj abunde kreskis;
sed vi estis nuda kaj nekovrita. 8 Mi preteriris preter
vi kaj ekvidis vin, kaj Mi vidis, ke estas via tempo,
la tempo de amo; kaj Mi etendis Mian mantelon sur
vin kaj kovris vian nudecon; kaj Mi ĵuris al vi, kaj Mi
faris interligon kun vi, diras la Sinjoro, la Eternulo,
kaj vi fariĝis Mia. 9 Mi lavis vin per akvo. Mi forlavis
de vi vian sangon, kaj Mi ŝmiris vin per oleo. 10 Mi
vestis vin per brodita vesto, sur viajn piedojn Mi metis
delikatledajn ŝuojn, Mi zonis vin per bisino, kaj Mi
kovris vin per silka kovrotuko. 11 Mi ornamis vin per
ornamaĵoj, Mi metis braceletojn sur viajn manojn,
kaj kolĉenon sur vian kolon. 12 Mi metis nazringon
sur vian nazon, kaj orelringojn sur viajn orelojn, kaj
belan kronon sur vian kapon. 13 Vi ornamiĝis per
oro kaj arĝento, viaj vestoj estis el bisino, silko, kaj
broditaĵo; plej delikatan farunon, mielon, kaj oleon
vi manĝis; kaj vi fariĝis tre kaj tre bela kaj atingis
reĝecon. 14 Kaj disvastiĝis via renomo inter la nacioj
pro via beleco, ĉar ĝi estis perfekta per la ornamaĵo,
kiun Mi metis sur vin, diras la Sinjoro, la Eternulo. 15
Sed vi fidis vian belecon, kaj vi komencis malĉasti,
apogante vin sur via renomo, kaj vi malĉastis kun
ĉiu pasanto, fordonante vin al li. 16 Vi prenis viajn
vestojn kaj faris al vi mikskolorajn oferaltaĵojn, kaj
sur ili vi malĉastis, kiel neniam estis kaj neniam
estos. 17 Vi prenis viajn ornamaĵojn el oro kaj el
arĝento, kiujn Mi donis al vi, kaj vi faris al vi bildojn
de virseksuloj kaj malĉastis kun ili. 18 Vi prenis viajn
broditajn vestojn kaj kovris per tio ilin, kaj Mian
oleon kaj Mian incenson vi donis al ili. 19 Mian panon,
kiun Mi donis al vi, la plej delikatan farunon, oleon,
kaj mielon, per kiuj Mi nutris vin, vi metis antaŭ
ilin kiel agrablan odoraĵon. Jes, tiel estis, diras la
Sinjoro, la Eternulo. 20 Vi prenis viajn filojn kaj viajn
filinojn, kiujn vi naskis al Mi, kaj vi buĉis ilin al ili kiel
manĝaĵon. Ĉu malgranda estas via malĉasteco? 21 Vi
buĉis Miajn infanojn kaj pasigis ilin tra fajro por ili.
22 Kaj en ĉiuj viaj abomenindaĵoj kaj malĉastaĵoj vi ne
rememoris la tagojn de via juneco, kiam vi estis nuda
kaj nekovrita, baraktanta en via sango. 23 Kaj post
ĉiuj viaj malbonagoj (ho ve, ve al vi! diras la Sinjoro,
la Eternulo) 24 vi konstruis al vi malĉastejon, kaj faris
al vi fialtaĵojn sur ĉiu strato. 25 En la komenco de ĉiu
vojo vi konstruis viajn fialtaĵojn, vi abomenindigis
vian belecon, vi etendis viajn piedojn al ĉiu pasanto,
kaj vi malĉastis. 26 Vi malĉastis kun la filoj de Egiptujo,
viaj grandkorpaj najbaroj, kaj vi multe malĉastis,
kolerigante Min. 27 Kaj jen Mi etendis Mian manon
kontraŭ vin kaj malgrandigis vian destinitaĵon, kaj Mi
transdonis vin al la volo de viaj malamikinoj, la filinoj
de Filiŝtujo, kiuj hontis pri via malvirta konduto. 28 Kaj
vi malĉastis kun la filoj de Asirio, ne povante satiĝi;
vi malĉastis kun ili, kaj tamen ne kontentiĝis. 29 Vi
multigis viajn malĉastaĵojn ĝis la lando de komercado,
Ĥaldeujo, sed ankaŭ tio vin ne kontentigis. 30 Per
kio Mi povas purigi vian koron, diras la Sinjoro,
la Eternulo, se vi faras ĉion ĉi tion, farojn de plej
senhonta malĉastistino? 31 Kiam vi aranĝis viajn
malĉastejojn ĉe la komenco de ĉiu vojo kaj faris viajn
fialtaĵojn sur ĉiu strato, vi estis ne kiel malĉastistino,
kiu ŝatas donacojn; 32 sed kiel malĉastanta virino,
kiu anstataŭ sia edzo akceptas fremdulojn. 33 Al ĉiuj
malĉastistinoj oni donas donacojn, sed vi mem donas
viajn donacojn al ĉiuj viaj amantoj, kaj vi subaĉetas
ilin, ke ili de ĉiuj flankoj venu malĉasti kun vi. 34
Ĉe via malĉastado fariĝas kun vi la malo de tio,
kion oni vidas ĉe aliaj virinoj: oni ne postkuras vin
por malĉastado, sed vi mem pagas, kaj al vi oni ne
donas pagon; tiamaniere vi estas la malo de aliaj.
35 Tial, ho malĉastistino, aŭskultu la vorton de la
Eternulo: 36 Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Pro tio,
ke vi malŝparas vian metalon kaj via nudeco estas
malkovrata en via malĉastado al viaj amistoj kaj al
ĉiuj viaj abomenindaj idoloj, kaj pro la sango de viaj
infanoj, kiujn vi fordonas al ili — 37 pro tio Mi kolektos
ĉiujn viajn amistojn, kun kiuj vi ĝuis, kaj ĉiujn, kiujn
vi amis, kaj ĉiujn, kiujn vi malamis, kaj Mi kolektos
ilin kontraŭ vi de ĉirkaŭe, kaj Mi malkovros antaŭ ili
vian nudecon, kaj ili vidos vian tutan hontindaĵon.
38 Kaj Mi juĝos vin laŭ la juĝoj kontraŭ adultulinoj

kaj kontraŭ sangoverŝantinoj, kaj Mi transdonos vin
al sangoverŝo kruela kaj severa. 39 Mi transdonos
vin en iliajn manojn, kaj ili detruos vian malĉastejon
kaj disbatos viajn fialtaĵojn, ili deprenos de vi viajn
vestojn, prenos viajn ornamaĵojn, kaj restigos vin
nuda kaj nekovrita. 40 Kaj ili venigos kontraŭ vin
homamason, kiu mortigos vin per ŝtonoj kaj dishakos
per siaj glavoj. 41 Kaj ili forbruligos viajn domojn per
fajro, kaj faros al vi juĝon antaŭ la okuloj de multaj
virinoj; kaj Mi ĉesigos vian malĉastadon, kaj vi ne
plu donos donacojn. 42 Mi kontentigos sur vi Mian
koleron, kaj Mia severeco trankviliĝos sur vi tiel, ke
Mi trankviliĝos kaj ne plu koleros. 43 Pro tio, ke vi
ne rememoris la tagojn de via juneco, sed incitis
Min per ĉio tio, Mi ankaŭ metos vian konduton sur
vian kapon, diras la Sinjoro, la Eternulo, por ke vi ne
plu faru la malĉastaĵon kun ĉiuj viaj abomenindaĵoj.
44 Jen ĉiu proverbisto diros pri vi proverbon: Kia la
patrino, tia la filino. 45 Vi estas filino de via patrino,
kiu malŝatis sian edzon kaj siajn infanojn, kaj vi estas
fratino de viaj fratinoj, kiuj malŝatis siajn edzojn kaj
siajn infanojn. Via patrino estas Ĥetidino, kaj via
patro estas Amorido. 46 Via pli maljuna fratino estas
Samario kun siaj filinoj, kiu loĝas maldekstre de vi;
kaj via pli juna fratino, kiu loĝas dekstre de vi, estas
Sodom kun siaj filinoj. 47 Sed eĉ ne laŭ ilia vojo vi
iris, kaj ne iliajn abomenindaĵojn vi faris; tio estis
malmulta por vi, kaj vi malboniĝis pli ol ili en ĉiuj viaj
agoj. 48 Kiel Mi vivas, diras la Sinjoro, la Eternulo, via
fratino Sodom kaj ŝiaj filinoj ne faris tion, kion faris vi
kaj viaj filinoj. 49 Jen kio estis la kulpo de via fratino
Sodom: malmodesteco, trosatiĝo per manĝado, kaj
senzorgeco, kiun havis ŝi kaj ŝiaj filinoj; kaj la manon
de malriĉulo kaj senhavulo ŝi ne subtenis. 50 Kaj ili
fieriĝis kaj faris abomenindaĵon antaŭ Mi, kaj Mi
forpuŝis ilin, kiam Mi tion vidis. 51 Samario ne faris
eĉ duonon de viaj pekoj; vi faris pli da abomenindaĵoj,
ol ili; per ĉiuj viaj abomenindaĵoj, kiujn vi faris, vi
faris viajn fratinojn preskaŭ virtulinoj. 52 Tial ankaŭ
vi nun portu vian malhonoron, kiun vi kondamnis en
viaj fratinoj, pro viaj pekoj, per kiuj vi abomenindiĝis
pli ol ili; ili estas virtulinoj en komparo kun vi; hontu
kaj portu vian malhonoron, ĉar vi kvazaŭ pravigis
viajn fratinojn. 53 Tamen kiam Mi revenigos iliajn
forkaptitojn, la forkaptitojn de Sodom kaj de ŝiaj
filinoj kaj la forkaptitojn de Samario kaj de ŝiaj filinoj,
tiam Mi revenigos ankaŭ viajn forkaptitojn kune kun
ili, 54 por ke vi portu vian malhonoron kaj hontu
pri ĉio, kion vi faris, estante konsolo por ili. 55 Viaj
fratinoj, Sodom kaj ŝiaj filinoj revenos al sia antaŭa
stato, kaj Samario kaj ŝiaj filinoj revenos al sia antaŭa
stato; ankaŭ vi kaj viaj filinoj revenos al via antaŭa
stato. 56 Ĉu via fratino Sodom ne estis objekto de
rezonado en via buŝo en la tempo de via fiereco, 57
antaŭ ol elmontriĝis via malboneco, kiel en la tempo
de la malhonoro de la filinoj de Sirio kaj ĉiuj ĝiaj
ĉirkaŭaĵoj, kaj de la filinoj de Filiŝtujo, kiuj malestimis
vin ĉirkaŭe? 58 Suferu do pro via malĉasteco kaj
pro viaj abomenindaĵoj, diras la Eternulo. 59 Ĉar
tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Mi agos kun vi
tiel, kiel vi agis, malŝatante la ĵuron kaj rompante la
interligon. 60 Tamen Mi rememoros Mian interligon
kun vi en la tempo de via juneco, kaj Mi restarigos
kun vi interligon eternan. 61 Kaj vi rememoros vian
konduton, kaj hontos, kiam vi akceptos al vi viajn
plej maljunajn kaj plej junajn fratinojn; kaj Mi donos
ilin al vi kiel filinojn, sed ne pro via interligo. 62 Mi
restarigos Mian interligon kun vi, kaj vi ekscios, ke Mi
estas la Eternulo; 63 por ke vi memoru kaj hontu, kaj
por ke vi ne plu povu malfermi vian buŝon pro honto,
kiam Mi pardonos al vi ĉion, kion vi faris, diras la
Sinjoro, la Eternulo.

17 Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante: 2
Ho filo de homo, proponu enigmon kaj parabolon
al la domo de Izrael; 3 kaj diru: Tiele diras la Sinjoro, la
Eternulo: Granda aglo kun grandaj flugiloj kaj grandaj
korpomembroj, plene kovrita de diverskoloraj plumoj,
venis sur Lebanonon kaj prenis pinton de cedro; 4
ĝi deŝiris ĝian supran junan branĉeton kaj alportis
ĝin en la landon de komercado kaj kuŝigis ĝin en
urbo de komercistoj. 5 Ĝi prenis iom el la semoj de la
lando, plantis ĝin sur prisemebla kampo, aranĝis ĝin
apud abunda akvo, tre singarde. 6 Kaj ĝi elkreskis kaj
fariĝis vasta vinberkreskaĵo kun malalta trunko; ĝiaj
flankobranĉoj fleksiĝis al ĝi malsupren, kaj ĝiaj radikoj
estis sub ĝi; kaj ĝi fariĝis vinbertrunko kaj elkreskigis
branĉojn kaj branĉetojn. 7 Kaj estis alia granda aglo
kun grandaj flugiloj kaj abundaj plumoj; kaj jen tiu
vinbertrunko tiris sin per siaj radikoj al ĝi kaj etendis
al ĝi siajn branĉojn, por ke ĝi trinkigu ĝin, de la bedoj,
kie ĝi estis plantita. 8 Sur bona kampo, apud abunda
akvo, ĝi estis plantita, por ke ĝi elkreskigu branĉojn
kaj portu fruktojn kaj estu belega vinbertrunko. 9

Diru: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Ĉu ĝi havos
sukceson? oni ja elŝiros ĝiajn radikojn, oni deŝiros
ĝiajn fruktojn, kaj ĝi velkos; ĉiuj ĝiaj elkreskintaj folioj
velkos, kaj oni ne bezonos grandan forton kaj multon
da homoj, por deŝiri ĝin de ĝiaj radikoj. 10 Kaj jen,
kvankam ĝi estas plantita, ĉu ĝi havos sukceson? ĉu ĝi
ne tute forvelkos, kiam la orienta vento ĝin tuŝos?
ĝi forvelkos sur la bedoj, kie ĝi kreskis. 11 Kaj aperis
al mi vorto de la Eternulo, dirante: 12 Diru do al la
domo malobeema: Ĉu vi ne scias, kion tio signifas?
Diru: Jen venis la reĝo de Babel en Jerusalemon, kaj
prenis ĝian reĝon kaj ĝiajn eminentulojn kaj venigis
ilin al si en Babelon; 13 kaj li prenis iun el la reĝa
idaro kaj faris kun li interligon kaj prenis de li ĵuron,
kaj la potenculojn de la lando li forprenis, 14 por ke
la regno estu humila kaj ne altigu sin, kaj por ke ĝi
konservu lian interligon kaj povu sin teni. 15 Sed tiu
defalis de li, kaj sendis siajn senditojn en Egiptujon,
por ke oni donu al li ĉevalojn kaj multe da homoj.
Ĉu li povas havi sukceson? ĉu povas saviĝi tiu, kiu
tiel agas? ĉu li saviĝos, se li rompis la interligon?
16 Kiel Mi vivas, diras la Sinjoro, la Eternulo, sur la
loko de tiu reĝo, kiu faris lin reĝo kaj antaŭ kiu li
malŝatis sian ĵuron kaj rompis lian interligon, ĉe li,
en Babel, li mortos. 17 Kaj Faraono kun granda forto
kaj multenombra anaro ne helpos al li en la milito,
kiam estos surŝutitaj remparoj kaj estos konstruitaj
bastionoj, por ekstermi multe da homoj. 18 Kaj ĉar
li malŝatis la ĵuron kaj rompis la interligon, ĉar li
donis sian manon kaj tamen faris ĉion ĉi tion, tial li
ne saviĝos. 19 Tial tiele diras la Sinjoro, la Eternulo:
Kiel Mi vivas, Mian ĵuron, kiun li malŝatis, kaj Mian
interligon, kiun li rompis, Mi metos sur lian kapon. 20
Mi ĵetos sur lin Mian reton, kaj li kaptiĝos en Mian
kaptilon; kaj Mi forkondukos lin en Babelon, kaj tie Mi
faros sur li juĝon pro la krimo, kiun li faris kontraŭ
Mi. 21 Kaj ĉiuj liaj forkurintoj el ĉiuj liaj taĉmentoj
falos de glavo, kaj la restintoj estos dispelitaj al ĉiuj
ventoj; kaj vi ekscios, ke Mi, la Eternulo, tion diris. 22
Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Mi mem prenos
branĉon de alta cedro kaj metos ĝin; el la supraj
junaj branĉetoj Mi deŝiros la plej delikatan, kaj Mi
plantos ĝin sur monto alta kaj eminenta. 23 Sur la
alta monto de Izrael Mi ĝin plantos, kaj ĝi elkreskigos
branĉojn kaj donos fruktojn kaj fariĝos belega cedro;
kaj loĝos sub ĝi ĉiaspecaj birdoj, ĉiaspecaj flugiluloj
nestos en la ombro de ĝiaj branĉoj. 24 Kaj ekscios
ĉiuj arboj de la kampo, ke Mi, la Eternulo, malaltigas
arbon altan kaj altigas arbon malaltan, ke Mi velkigas
arbon sukoplenan kaj verdigas arbon velkintan; Mi, la
Eternulo, tion diris, kaj Mi tion plenumos.

18 Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante:
2 Kial vi uzas ĉe vi en la lando de Izrael ĉi tiun
proverbon kaj diras: La patroj manĝis nematurajn
vinberojn, kaj la dentoj de la filoj agaciĝis? 3 Kiel Mi
vivas, diras la Sinjoro, la Eternulo, neniu plu uzos ĉe vi
tiun proverbon en Izrael. 4 Jen ĉiuj animoj apartenas
al Mi: kiel la animo de la patro, tiel ankaŭ la animo de
la filo apartenas al Mi; tiu animo, kiu pekas, ĝi mortos.
5 Sed se iu estas virta kaj agas laŭleĝe kaj juste; 6 ne
manĝas sur la montoj kaj ne levas siajn okulojn al la
idoloj de la domo de Izrael, ne malpurigas la edzinon
de sia proksimulo kaj ne alproksimiĝas al virino
en la tempo de ŝia monataĵo; 7 neniun perfortas,
redonas al la ŝuldanto lian garantiaĵon, ne faras rabon,
donas sian panon al malsatulo kaj nudulon kovras per
vesto; 8 ne donas kontraŭ procentegoj kaj ne prenas
troprofiton, detenas sian manon de maljustaĵo, faras
inter homo kaj homo juĝon justan; 9 sekvas Miajn
leĝojn kaj observas Miajn ordonojn, por plenumi ilin
ĝuste: tiu estas virtulo, kaj li certe vivos, diras la
Sinjoro, la Eternulo. 10 Sed se li naskigis filon, kiu
estas rabisto, verŝas sangon, aŭ faras ion similan; 11
kaj ĉion diritan li mem ne faras, sed li manĝas sur la
montoj, malpurigas la edzinon de sia proksimulo; 12
perfortas malriĉulon kaj senhavulon, faras rabadon,
ne redonas garantiaĵon, levas siajn okulojn al idoloj,
faras abomenindaĵon; 13 donas kontraŭ procentegoj,
prenas troprofiton: ĉu tia povas vivi? li ne devas
vivi: ĉar li faras ĉiujn tiujn abomenindaĵojn, li devas
morti; lia sango estu sur li. 14 Sed jen li naskigis
filon, kiu vidas ĉiujn pekojn de sia patro, kiujn ĉi
tiu faras, kaj li timas, kaj ne faras ion similan: 15
sur la montoj li ne manĝas, siajn okulojn li ne levas
al la idoloj de la domo de Izrael, la edzinon de sia
proksimulo li ne malpurigas; 16 li neniun perfortas,
garantiaĵon ne prenas, rabadon ne faras, sian panon li
donas al malsatulo kaj nudulon li kovras per vesto;
17 de premado de malriĉulo detenas sian manon,
procentegon kaj troprofiton ne prenas, plenumas
Miajn ordonojn kaj sekvas Miajn leĝojn: li ne mortos
pro la pekoj de sia patro, sed li nepre vivos. 18 Kaj lia
patro, ĉar li faris kruelaĵojn, prirabis fraton, kaj faris

inter sia popolo tion, kio estas nebona: li mortos pro
siaj malbonagoj. 19 Vi diros: Kial filo ne estas punata
pro la malbonagoj de la patro? La filo agis ĝuste kaj
juste, observis ĉiujn Miajn leĝojn kaj plenumis ilin;
tial li nepre vivos. 20 Tiu animo, kiu pekas, ĝi mortos;
filo ne suferos pro la malbonagoj de la patro, kaj patro
ne suferos pro la malbonagoj de la filo; la virteco
de virtulo estos sur li, kaj la malpieco de malpiulo
estos sur li. 21 Sed se malpiulo deturnas sin de ĉiuj
siaj pekoj, kiujn li faris, kaj li observos ĉiujn Miajn
leĝojn kaj agados ĝuste kaj juste, tiam li vivos, li
ne mortos. 22 Ĉiuj liaj malbonagoj, kiujn li faris, ne
estos rememorataj; pro siaj bonaj agoj, kiujn li faris, li
vivos. 23 Ĉu Mi deziras la morton de malpiulo? diras
la Sinjoro, la Eternulo; kiam li deturnos sin de sia
konduto, li ja vivos. 24 Kaj se virtulo deturnos sin
de sia virteco kaj faros malbonagojn, agos simile al
ĉiuj abomenindaĵoj, kiujn faras malpiulo: ĉu li tiam
povas vivi? Ĉiuj bonaj agoj, kiujn li faris, ne estos
rememorataj; pro siaj krimoj, kiujn li faris, kaj pro
siaj pekoj, kiujn li faris, pro ili li mortos. 25 Vi diros:
Ne ĝusta estas la maniero de agado de la Sinjoro.
Aŭskultu do, ho domo de Izrael: Ĉu Mia maniero de
agado estas ne ĝusta? Ne, via konduto estas ne ĝusta.
26 Kiam virtulo deturnas sin de sia virteco kaj faras
malbonagojn kaj mortas pro tio, tiam li mortas pro
siaj malbonagoj, kiujn li faris. 27 Kaj kiam malpiulo
deturnas sin de siaj malbonagoj, kiujn li faris, kaj li
agas ĝuste kaj juste, tiam li donas vivon al sia animo.
28 Ĉar li rigardis, kaj retiris sin de ĉiuj siaj malbonagoj,
kiujn li faris, tial li nepre vivos, li ne mortos. 29 La
domo de Izrael diros: Ne ĝusta estas la agadmaniero
de la Sinjoro. Ĉu Mia agadmaniero estas ne ĝusta, ho
domo de Izrael? Ne, via agadmaniero estas ne ĝusta.
30 Tial Mi juĝos vin, ho domo de Izrael, ĉiun laŭ lia
konduto, diras la Sinjoro, la Eternulo. Pentu kaj retiru
vin de ĉiuj viaj krimoj, por ke la malbonagoj ne estu
por vi falilo. 31 Forĵetu de vi ĉiujn viajn krimojn, per
kiuj vi pekis, kaj faru al vi novan koron kaj novan
spiriton. Kial vi mortu, ho domo de Izrael? 32 Ĉar Mi
ne deziras la morton de mortanto, diras la Sinjoro, la
Eternulo; konvertu vin kaj vivu.

**19** Kaj vi eksonigu funebran kanton pri la princoj
de Izrael; 2 kaj diru: Kial via patrino kiel leonino
kuŝis inter leonoj, inter leonidoj edukis siajn idojn?
3 Ŝi edukis unu el siaj idoj, ĝi fariĝis leonido, kaj ĝi
lernis disŝiri kaptaĵon, ĝi manĝis homojn. 4 Kaj aŭdis
pri ĝi popoloj; ĝi estas kaptita en ilian kavon, kaj
ili forkondukis ĝin en ĉenoj en la landon Egiptan.
5 Kiam ŝi vidis, ke ŝia espero malaperis, ŝi prenis
alian el siaj idoj kaj faris ĝin leonido. 6 Irante meze
de leonoj, ĝi fariĝis leonido, lernis disŝiri kaptaĵon,
manĝis homojn. 7 Ĝi difektis iliajn loĝejojn, dezertigis
iliajn urbojn; kaj la lando, kun ĉio, kio estis en ĝi,
eksentis teruron antaŭ la voĉo de ĝia blekegado. 8
Tiam kolektiĝis kontraŭ ĝi la popoloj el la ĉirkaŭaj
landoj kaj ĵetis sur ĝin sian reton, kaj ĝi kaptiĝis en
ilian kavon. 9 Kaj oni metis ĝin en ĉenoj en kaĝegon
kaj forportis ĝin al la reĝo de Babel; kaj oni metis ĝin
en fortikigitan lokon, por ke oni ne plu aŭdu ĝian
voĉon sur la montoj de Izrael. 10 Via patrino estis,
simile al vi, kiel vinberkreskaĵo, plantita apud akvo,
fruktoriĉa kaj branĉoriĉa pro la abundo de akvo. 11
Kaj elkreskis al ĝi branĉoj tiel fortikaj, ke ili taŭgis kiel
sceptroj de regantoj, kaj alte leviĝis ĝia trunko inter
la branĉaro; kaj ĝi estis bone videbla pro sia alteco
kaj pro la multo de siaj branĉoj. 12 Sed en kolero oni
ĝin elŝiris kaj ĵetis sur la teron, kaj la orienta vento
elsekigis ĝiajn fruktojn; derompiĝis kaj velksekiĝis
la fortikaj branĉoj, fajro ilin konsumis. 13 Kaj nun ĝi
estas transplantita en la dezerton, en landon sekan
kaj senakvan. 14 Kaj eliris fajro el unu el ĝiaj branĉoj
kaj forkonsumis ĝiajn fruktojn; kaj jam ne restis sur ĝi
fortika branĉo por sceptro de regado. Funebra kanto
tio estas, kaj ĝi restos funebra kanto.

**20** En la sepa jaro, en la deka tago de la kvina
monato, venis kelkaj el la plejaĝuloj de Izrael,
por demandi la Eternulon, kaj ili sidiĝis antaŭ mi. 2
Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante: 3 Ho
filo de homo, parolu al la plejaĝuloj de Izrael, kaj
diru al ili: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Ĉu por
demandi Min vi venis? kiel Mi vivas, Mi ne respondos
al via demando, diras la Sinjoro, la Eternulo. 4 Se vi
volas juĝi ilin, se vi volas juĝi, ho filo de homo, tiam
montru al ili la abomenindaĵojn de iliaj patroj, 5 kaj
diru al ili: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: En la
tago, kiam Mi elektis Izraelon kaj levis Mian manon
al la idaro de la domo de Jakob, kiam Mi konigis
Min al ili en la lando Egipta, kaj, levante al ili Mian
manon, diris: Mi estas la Eternulo, via Dio — 6 en tiu
tago Mi per levo de la mano promesis al ili, ke Mi
elkondukos ilin el la lando Egipta en landon, kiun

Mi elektis por ili, kie fluas lakto kaj mielo, kaj kiu
estas la plej bela el ĉiuj landoj. 7 Kaj Mi diris al ili:
Ĉiu el vi forĵetu la fiaĵojn, kiuj estas antaŭ liaj okuloj,
kaj ne malpurigu vin per la idoloj de Egiptujo: Mi, la
Eternulo, estas via Dio. 8 Sed ili malobeis Min kaj ne
volis aŭskulti Min, kaj neniu el ili forĵetis la fiaĵojn,
kiuj estis antaŭ liaj okuloj, kaj la idolojn de Egiptujo
ili ne forlasis. Kaj Mi intencis elverŝi sur ilin Mian
koleron, kontentigi sur ili Mian indignon meze de la
lando Egipta. 9 Tamen pro Mia nomo, por ke ĝi ne
malsanktiĝu antaŭ la okuloj de la nacioj, inter kiuj ili
estis kaj antaŭ kies okuloj Mi konigis Min al ili, Mi agis
tiel, ke Mi elkondukis ilin el la lando Egipta. 10 Kaj Mi
elkondukis ilin el la lando Egipta kaj venigis ilin en
la dezerton. 11 Kaj Mi donis al ili Miajn leĝojn, kaj
Mi konigis al ili Miajn decidojn, per kies plenumado
homo vivas. 12 Ankaŭ Miajn sabatojn Mi donis al ili,
por ke ili estu signo inter Mi kaj ili, por ke ili sciu,
ke Mi, la Eternulo, ilin sanktigas. 13 Sed la domo de
Izrael ribelis kontraŭ Mi en la dezerto: ili ne sekvis
Miajn leĝojn, kaj ili malŝatis Miajn decidojn, per kies
plenumado homo vivas, kaj Miajn sabatojn ili tre
malsanktigis. Kaj Mi intencis elverŝi sur ilin Mian
koleron en la dezerto, por ekstermi ilin. 14 Tamen Mi
agis pro Mia nomo, por ke ĝi ne malsanktiĝu antaŭ la
okuloj de la nacioj, antaŭ kies okuloj Mi elkondukis
ilin. 15 Mi levis kontraŭ ilin Mian manon en la dezerto,
por ne venigi ilin en la landon, kiun Mi destinis, en
kiu fluas lakto kaj mielo kaj kiu estas la plej bela el ĉiuj
landoj; 16 pro tio, ke ili malŝatis Miajn decidojn, ne
sekvis Miajn leĝojn, kaj malsanktigis Miajn sabatojn;
ĉar ilia koro sekvis iliajn idolojn. 17 Tamen Mia okulo
indulgis ilin, por ne pereigi ilin, kaj Mi ne faris al ili
finon en la dezerto. 18 Kaj Mi diris al iliaj infanoj en la
dezerto: Ne sekvu la leĝojn de viaj patroj, ne observu
iliajn morojn, kaj ne malpurigu vin per iliaj idoloj.
19 Mi, la Eternulo, estas via Dio; Miajn leĝojn sekvu,
kaj Miajn decidojn observu, kaj plenumu ilin; 20 kaj
tenu sankte Miajn sabatojn, por ke ili estu signo inter
Mi kaj vi, por ke vi sciu, ke Mi, la Eternulo, estas via
Dio. 21 Sed la infanoj malobeis Min: Miajn leĝojn ili ne
sekvis, ili ne observis kaj ne plenumis Miajn decidojn,
per kies plenumado homo vivas, malsanktigis Miajn
sabatojn. Kaj Mi intencis elverŝi Mian koleron sur
ilin, kontentigi Mian indignon sur ili en la dezerto.
22 Tamen Mi retiris Mian manon kaj agis pro Mia
nomo, por ke ĝi ne malsanktiĝu antaŭ la okuloj de la
nacioj, antaŭ kies okuloj Mi elkondukis ilin. 23 Sed,
levinte Mian manon, Mi diris al ili en la dezerto, ke
Mi disĵetos ilin inter la naciojn kaj dispelos ilin en
diversajn landojn 24 pro tio, ke ili ne plenumis Miajn
decidojn, malŝatis Miajn leĝojn, malsanktigis Miajn
sabatojn, kaj direktis siajn okulojn al la idoloj de siaj
patroj. 25 Tial Mi donis al ili instituciojn nebonajn, kaj
aranĝojn, per kiuj ili ne povas vivi; 26 kaj Mi permesis
al ili malpurigi sin per siaj oferoj, trairigante tra fajro
ĉiun unuenaskiton, por ke Mi ruinigu ilin, por ke ili
eksciu, ke Mi estas la Eternulo. 27 Tial parolu al la
domo de Izrael, ho filo de homo, kaj diru al ili, ke tiele
diras la Sinjoro, la Eternulo: Ankoraŭ plue viaj patroj
malhonoris Min per la pekoj, kiujn ili faris kontraŭ
Mi: 28 Mi venigis ilin en la landon, pri kiu Mi per levo
de mano promesis, ke Mi donos ĝin al ili; sed ĉie,
kie ili vidis ian altan monteton aŭ ian branĉoriĉan
arbon, ili buĉis tie siajn oferojn kaj alportis tien
siajn kolerigantajn donojn, metis tien siajn agrablajn
odoraĵojn kaj verŝis tie siajn verŝoferojn. 29 Kaj Mi
diris al ili: Kio estas tiu altaĵo, sur kiun vi iras? Kaj
oni donis al tiu loko la nomon Altaĵo ĝis la nuna
tago. 30 Tial diru al la domo de Izrael: Tiele diras
la Sinjoro, la Eternulo: Vi malpurigas vin konforme
al la konduto de viaj patroj, kaj vi malĉaste sekvas
iliajn abomenindaĵojn; 31 alportante viajn donacojn,
trairigante viajn infanojn tra fajro, vi malpurigas vin
per ĉiuj viaj idoloj ĝis la nuna tempo; ĉu do Mi povas
respondi al viaj demandoj, ho domo de Izrael? Kiel Mi
vivas, diras la Sinjoro, la Eternulo, Mi ne respondos
al viaj demandoj. 32 Kaj kio venas en vian kapon,
kiam vi diras: Ni estu kiel la nacioj, kiel la gentoj
de la landoj, servante al ligno kaj al ŝtonoj — tio
ne efektiviĝos. 33 Kiel Mi vivas, diras la Sinjoro, la
Eternulo, per forta mano, per etendita brako, kaj per
elverŝado de kolero Mi reĝos super vi; 34 kaj per forta
mano, per etendita brako, kaj per elverŝado de kolero,
Mi elkondukos vin el inter la popoloj, kaj kolektos vin
el la landoj, kien vi estas disĵetitaj; 35 kaj Mi venigos
vin en la dezerton de la popoloj, kaj tie Mi procesos
kun vi vizaĝon kontraŭ vizaĝo. 36 Kiel Mi procesis kun
viaj patroj en la dezerto de la lando Egipta, tiel Mi
procesos kun vi, diras la Sinjoro, la Eternulo. 37 Kaj
Mi pasigos vin sub vergo kaj venigos vin en la ligilojn
de la interligo; 38 kaj Mi eligos el inter vi tiujn, kiuj
ribelis kaj pekis kontraŭ Mi, el la lando de ilia loĝado
Mi eligos ilin, sed en la landon de Izrael ili ne eniros.

Kaj vi ekscios, ke Mi estas la Eternulo. 39 Kaj pri vi,
ho domo de Izrael, tiele diras la Sinjoro, la Eternulo:
Ĉiu el vi iru kaj servu al siaj idoloj, se vi ne aŭskultas
Min; sed Mian sanktan nomon ne plu malhonoru per
viaj donoj kaj per viaj idoloj. 40 Ĉar sur Mia sankta
monto, sur la alta monto de Izrael, diras la Sinjoro,
la Eternulo, tie servos al Mi la tuta domo de Izrael,
ĉiuj, kiuj estos en la lando; tie Mi akceptos ilin favore,
kaj tie Mi akceptos viajn oferdonojn kaj la unuaaĵojn
de viaj donoj, kun ĉio, kion vi dediĉas al Mi. 41 Mi
akceptos vin favore ĉe la agrabla odoraĵo, kiam Mi
elkondukos vin el inter la popoloj, kaj kolektos vin
el la landoj, kien vi estis disĵetitaj; kaj Mi sanktiĝos
per vi antaŭ la okuloj de la nacioj. 42 Kaj vi ekscios,
ke Mi estas la Eternulo, kiam Mi venigos vin en la
landon de Izrael, en la landon, pri kiu Mi levis Mian
manon, ke Mi donos ĝin al viaj patroj. 43 Kaj vi
rememoros tie vian konduton kaj ĉiujn viajn agojn,
per kiuj vi malpurigis vin, kaj vi sentos abomenon
antaŭ vi mem kontraŭ ĉiuj malbonagoj, kiujn vi faris.
44 Kaj vi ekscios, ke Mi estas la Eternulo, kiam Mi agos
kun vi pro Mia nomo, ne konforme al via malbona
konduto kaj al viaj pereigaj agoj, ho domo de Izrael,
diras la Sinjoro, la Eternulo. 45 Kaj aperis al mi vorto
de la Eternulo, dirante: 46 Ho filo de homo, direktu
vian vizaĝon al la vojo suden, prediku al la sudo, kaj
profetu pri la arbaro de la suda kampo. 47 Kaj diru
al la suda arbaro: Aŭskultu la vorton de la Eternulo!
Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Jen Mi ekbruligos
en vi fajron, kaj ĝi formanĝegos en vi ĉiun arbon
verdan kaj ĉiun arbon velksekiĝintan; ne estingiĝos la
flamanta fajro, kaj forbrulos ĉio, kio troviĝas de la
sudo ĝis la nordo. 48 Kaj ĉiu karno vidos, ke Mi, la
Eternulo, tion ekbruligis tiel, ke oni ne povas estingi.
49 Kaj mi diris: Ho Sinjoro, ho Eternulo! ili diras pri
mi: Li parolas ja nur parabolojn.

**21** Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante: 2
Ho filo de homo, turnu vian vizaĝon al Jerusalem,
prediku pri la sanktaĵoj, kaj profetu pri la lando de
Izrael. 3 Kaj diru al la lando de Izrael: Tiele diras la
Eternulo: Jen Mi iras kontraŭ vin, Mi eltiros Mian
glavon el ĝia ingo, kaj Mi ekstermos inter vi virtulojn
kaj malpiulojn. 4 Ĉar Mi ekstermos inter vi virtulojn
kaj malpiulojn, tial Mia glavo eliros el sia ingo kontraŭ
ĉiun karnon de la sudo ĝia la nordo. 5 Kaj ĉiu karno
ekscios, ke Mi, la Eternulo, eltiris Mian glavon el ĝia
ingo, kaj ĝi ne plu revenos tien. 6 Kaj vi, ho filo de
homo, ĝemu, kun doloro de la lumboj, kaj maldolĉe
ĝemu antaŭ iliaj okuloj. 7 Kaj kiam ili demandos
vin, pro kio vi ĝemas, respondu: Pro la sciigo, kiu
venis, kaj de kiu ĉiu koro disfandiĝos, ĉiuj manoj
senfortiĝos, ĉiu spirito senkuraĝiĝos, kaj ĉiuj genuoj
fariĝos kiel akvo; jen tio venas kaj plenumiĝos, diras
la Sinjoro, la Eternulo. 8 Kaj aperis al mi vorto de
la Eternulo, dirante: 9 Ho filo de homo, profetu, kaj
diru: Tiele diras la Eternulo: Proklamu: Glavo, glavo
estas akrigita kaj purigita; 10 ĝi estas akrigita, por
buĉi; ĝi estas purigita, por brili. Ĉu oni povas ĝoji,
kiam la sceptron de Mia filo malŝatas ĉia ligno? 11
Li donis ĝin, por purigi, por ke oni povu preni ĝin
en la manon; la glavo estas akrigita kaj purigita,
por doni ĝin en la manon de mortiganto. 12 Kriu
kaj ploru, ho filo de homo, ĉar ĝi iras kontraŭ Mian
popolon, kontraŭ ĉiujn eminentulojn de Izrael, kiuj
estas kolektitaj kune kun Mia popolo sub la glavon.
Pro tio batu viajn lumbojn. 13 Ĉar estis farita provo,
sed kion ĝi helpis? eĉ malŝatata la sceptro ne povas
ekzisti, diras la Sinjoro, la Eternulo. 14 Kaj vi, ho
filo de homo, profetu, kaj interfrapu la manojn; ĉar
la glavo duobliĝos, eĉ triobliĝos; ĝi estas glavo por
mortigado, glavo de granda mortigado ĝi estas, kiu
penetros al ili en la ĉambrojn. 15 Mi sendos glavon
teruran, por ke la koroj ektremu, kaj por ke multaj falu
ĉe ĉiuj iliaj pordegoj. Ha, kiel ĝi brilas, kiel akrigita
ĝi estas por la buĉado! 16 Kolektiĝu dekstren, metu
vin maldekstren, kien ajn via vizaĝo sin tiras. 17 Mi
plaŭdos per Miaj manoj, kaj Mi kontentigos Mian
indignon; Mi, la Eternulo, tion diris. 18 Kaj aperis al mi
vorto de la Eternulo, dirante: 19 Vi, ho filo de homo,
marku al vi du vojojn, per kiuj venos la glavo de la
reĝo de Babel; ambaŭ devas eliri el unu lando; elektu
lokon sur la ĉefa vojo, elektu urbon. 20 Marku vojon,
per kiu devas veni glavo en Raban de la Amonidoj, kaj
en Judujon, en la fortikigitan Jerusalemon. 21 Ĉar la
reĝo de Babel haltis ĉe la disvojiĝo, ĉe la komenco
de du vojoj; por ricevi antaŭdirojn, li ĵetas sagojn,
demandas la domajn diojn, esploras hepaton. 22
Sur la dekstra flanko la sortodemandado montras
Jerusalemon, por starigi muregrompilojn, malfermi
la buŝon por mortigado, sonigi militajn trumpetojn,
direkti muregrompilojn kontraŭ la pordegojn, ŝuti
remparon, konstrui bastionon. 23 Sed tio aperas
al ili kiel antaŭdiro malvera, ili faras ĵurojn, kaj li

rememorigas la krimojn, por ke ili estu kaptitaj. 24
Tial tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Pro tio, ke vi
rememoras viajn krimojn, elmontras viajn kulpojn
en ĉiuj viaj agoj — pro tio, ke vi rememoras, vi
estos kaptitaj per mano. 25 Kaj vi, ho senhonora kaj
malpia estro de Izrael, kies tago alvenis nun, kiam
devas ĉesiĝi liaj krimoj — 26 tiele diras la Sinjoro, la
Eternulo: Deprenu la cidaron kaj demetu la kronon;
ne plue estos tiel; kiu estis humila, tiu altiĝos, kaj
kiu estis fiera, tiu malaltiĝos. 27 Mi forigos, forigos,
forigos ĝin; kaj ĝi ne ekzistos, ĝis venos tiu, kiu
havas rajton je ĝi, kaj al li Mi ĝin donos. 28 Kaj
vi, ho filo de homo, profetu, kaj diru: Tiele diras
la Sinjoro, la Eternulo, pri la Amonidoj kaj pri ilia
hontindeco, kaj diru: Glavo, glavo estas nudigita por
buĉado, akrigita por ekstermado, ke ĝi brilu; 29 pro
tio, ke oni prezentas al vi malverajn viziojn, ke oni
antaŭdiras al vi mensogaĵon, por meti vin sur la
kolojn de mortigotaj malpiuloj, kies tago alvenis nun,
kiam devas ĉesiĝi iliaj krimoj. 30 Remetu ĝin en ĝian
ingon. Sur la loko, kie vi estas kreita, en la lando de
via naskiĝo, Mi juĝos vin. 31 Kaj Mi elverŝos sur vin
Mian indignon, Mi blovos sur vin la fajron de Mia
kolero, kaj Mi transdonos vin en la manojn de homoj
furiozaj, lertaj ekstermistoj. 32 Vi fariĝos manĝaĵo
por la fajro; via sango elverŝiĝos en la lando; oni ne
rememoros vin; ĉar Mi, la Eternulo, tion diris.

**22** Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante:
2 Ĉu vi, ho filo de homo, volas juĝi la urbon de
sango kaj montri al ĝi ĉiujn ĝiajn abomenindaĵojn? 3
Diru, ke tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Ho urbo, kiu
elverŝas sangon en sia mezo, por ke venu ĝia tempo,
kaj kiu faras al si idolojn, por malpuriĝi! 4 Per la sango,
kiun vi elverŝis, vi kulpiĝis, kaj per viaj idoloj, kiujn vi
faris, vi malpuriĝis; vi alproksimigis vian tempon kaj
alvenigis vian jaron. Pro tio Mi faros vin hontindaĵo
inter la nacioj kaj mokataĵo por ĉiuj landoj. 5 Tiuj, kiuj
estas proksimaj, kaj tiuj, kiuj estas malproksimaj de vi,
mokos vin, kiu havos malpuran nomon kaj grandan
maltrankvilecon. 6 Jen la estroj de Izrael, ĉiu el ili laŭ
sia potenco, estis ĉe vi, por verŝi sangon. 7 Patron kaj
patrinon oni malŝatis ĉe vi, fremdulon oni premis
inter vi, al orfo kaj vidvino oni faris maljustaĵon ĉe vi.
8 Miajn sanktaĵojn vi malestimis, kaj Miajn sabatojn vi
malsanktigis. 9 Kalumniantoj estis ĉe vi, por verŝi
sangon; sur la montoj oni manĝis ĉe vi, malĉastaĵojn
oni faris meze de vi. 10 Nudaĵon de patro oni malkovris
ĉe vi, perfortis virinon dum ŝia monataĵo. 11 Oni faris
abomenindaĵon kun la edzino de sia proksimulo, oni
malpurigis sian bofilinon per malĉastaĵo, oni perfortis
ĉe vi sian fratinon, filinon de sia patro. 12 Subaĉeton
oni prenis ĉe vi, por verŝi sangon, procentegon kaj
troprofiton vi prenis, pro avideco vi premis viajn
proksimulojn, kaj Min vi forgesis, diras la Sinjoro, la
Eternulo. 13 Kaj jen Mi interfrapis Miajn manojn pro
via profitemeco, kiun vi montris, kaj pro la verŝado
de sango, kiu estis meze de vi. 14 Ĉu via koro rezistos,
kaj ĉu viaj manoj konservos sian forton, en la tempo,
kiam Mi komencos Mian faradon kontraŭ vi? Mi, la
Eternulo, tion diris, kaj Mi faros. 15 Kaj Mi disĵetos
vin inter la naciojn, kaj Mi dispelos vin en diversajn
landojn, kaj Mi tute deprenos de vi vian malpurecon.
16 Kaj vi humiligos vin antaŭ la okuloj de la nacioj; kaj
vi ekscios, ke Mi estas la Eternulo. 17 Kaj aperis al mi
vorto de la Eternulo, dirante: 18 Ho filo de homo! la
domo de Izrael fariĝis por Mi kiel skorio: ili ĉiuj, kupro,
stano, fero, kaj plumbo, interne de la forno fariĝis
skorio de arĝento. 19 Tial tiele diras la Sinjoro, la
Eternulo: Ĉar vi ĉiuj fariĝis skorio, tial jen Mi kolektos
vin en Jerusalemon. 20 Kiel oni kolektas arĝenton,
kupron, feron, plumbon, kaj stanon en forno, por
blovi sur ilin fajron kaj fandi ilin, tiel Mi kolektos en
Mia kolero kaj en Mia indigno, kuŝigos, kaj fandos vin.
21 Mi kunigos vin kaj blovos sur vin la fajron de Mia
kolero, kaj vi fandiĝos en ĝi. 22 Kiel fandiĝas arĝento
en la forno, tiel vi fandiĝos en ĝi; kaj vi ekscios, ke
Mi, la Eternulo, elverŝis sur vin Mian koleron. 23 Kaj
aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante: 24 Ho filo
de homo, diru al ĝi: Vi estas lando ne purigata, ne
pripluvata en la tago de kolero. 25 La amasiĝintaj
profetoj en ĝi estas kiel blekeganta leono, kiu disŝiras
kaptitaĵon; ili manĝas animojn, forprenas valoraĵojn
kaj multekostaĵojn, multigas en ĝi la nombron de ĝiaj
vidvinoj. 26 Ĝiaj pastroj kripligas Mian instruon kaj
malsanktigas Miajn sanktaĵojn; ili ne distingas inter
sanktaĵo kaj nesanktaĵo, ne montras la diferencon
inter malpuraĵo kaj puraĵo; kaj de Miaj sabatoj ili
forturnis siajn okulojn, kaj Mi estas malsanktigata
inter ili. 27 Ĝiaj potenculoj en ĝi estas kiel lupoj, kiuj
disŝiras kaptitaĵon, verŝas sangon, pereigas animojn,
por akiri profiton. 28 Ĝiaj profetoj ŝmiras ilin per
maltaŭga mortero, predikas malverajn viziojn, faras
al ili mensogajn antaŭdirojn, dirante, ke tiele diris la

Sinjoro, la Eternulo, kvankam la Eternulo ne parolis.
29 La popolo de la lando faras perfortaĵojn, senĉese
rabas, premas malriĉulon kaj senhavulon, perfortas la
fremdulon sen ia justeco. 30 Mi serĉis inter ili homon,
kiu aranĝus barilon kaj stariĝus antaŭ Mi ĉe la breĉo,
por defendi la landon, ke Mi ne pereigu ĝin; sed Mi
ne trovis. 31 Kaj Mi elverŝos sur ilin Mian koleron,
Mi ekstermos ilin per la fajro de Mia indigno; ilian
konduton Mi metos sur ilian kapon, diras la Sinjoro,
la Eternulo.

**23** Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante:
2 Ho filo de homo! estis du virinoj, filinoj de unu
patrino. 3 Kaj ili malĉastis en Egiptujo, en sia juneco
ili malĉastis; tie premiĝis ilia brusto, kaj tie palpiĝis
iliaj virgaj mamoj. 4 Iliaj nomoj estas: la nomo de la
pli aĝa, Ohola; kaj la nomo de ŝia fratino, Oholiba. Ili
fariĝis Miaj edzinoj, kaj ili naskis filojn kaj filinojn.
Ohola estas Samario, kaj Oholiba estas Jerusalem. 5
Ohola, estante jam Mia, malĉastis, kaj volupte amis
siajn amistojn, siajn najbarojn, la Asirianojn, 6 kiuj
portas vestojn purpurajn, la estrojn kaj urboregantojn,
kiuj ĉiuj estas ĉarmaj junuloj, lertaj rajdistoj. 7 Kaj
ŝi malĉastis kun ili, kun ĉiuj plej ĉarmaj filoj de
Asirio; kaj ŝi malpurigis sin per ĉiuj idoloj de tiuj,
kiujn ŝi volupte amis. 8 Kaj ŝi ne forlasis ankaŭ sian
malĉastadon kun la Egiptoj, kiuj kuŝadis kun ŝi dum
ŝia juneco, palpadis ŝiajn virgajn mamojn, kaj verŝadis
sur ŝin sian malĉastaĵon. 9 Tial Mi transdonis ŝin
en la manojn de ŝiaj amistoj, en la manojn de la
filoj de Asirio, al kiuj ŝi havis voluptan pasion. 10 Ili
malkovris ŝian nudaĵon, prenis ŝiajn filojn kaj ŝiajn
filinojn, kaj ŝin mem ili mortigis per glavo. Kaj ŝi
ricevis malhonoran nomon inter la virinoj, kiam pri
ŝi estis farita juĝo. 11 Tion vidis ŝia fratino Oholiba,
kaj en siaj voluptaĵoj ŝi agis ankoraŭ pli malbone ol
ŝi, kaj ŝia malĉastado estis ankoraŭ pli granda, ol la
malĉastado de ŝia fratino. 12 Ŝi amis volupte la filojn
de Asirio, estrojn kaj urboregantojn, siajn najbarojn,
kiuj portis belajn vestojn, estis lertaj rajdistoj, kaj
ĉiuj estis ĉarmaj junuloj. 13 Mi vidis, ke ŝi malpuriĝis,
kaj ke ambaŭ havas la saman konduton. 14 Sed ĉi tiu
malĉastis ankoraŭ pli. Kiam ŝi vidis pentritajn virojn
sur la muro, bildojn de Ĥaldeoj, kolore pentritajn, 15
kun zonoj ĉirkaŭ siaj lumboj, kun longaj kapkovroj sur
siaj kapoj, aspektantajn kiel herooj, prezentantajn la
bildon de Babelanoj el Ĥaldeujo, ilia naskiĝlando, 16
tiam ŝi volupte ekamis ilin, kiam ŝi vidis ilian bildon,
kaj ŝi sendis al ili senditojn en Ĥaldeujon. 17 Kaj
la Babelanoj venis al ŝi, por ame kuŝi kun ŝi, kaj ili
malpurigis ŝin per sia malĉastaĵo, kaj ŝi malpuriĝis
per ili; kaj poste ŝia animo trosatiĝis de ili. 18 Kaj
kiam ŝia malĉastado kaj ŝia hontindeco fariĝis tro
malkaŝa, tiam Mia animo tediĝis de ŝi, kiel Mia animo
tediĝis de ŝia fratino. 19 Sed ŝi malĉastadis ĉiam
pli, rememorante la tagojn de sia juneco, kiam ŝi
malĉastadis en la lando Egipta. 20 Kaj ŝi volupte
ekamis pli ol iliaj kromvirinoj ilin, kies karno estas
kiel karno de azenoj kaj kies elfluo estas kiel elfluo de
ĉevaloj. 21 Kaj vi ripetis la malĉastadon de via juneco,
kiam la Egiptoj palpadis vian bruston pro viaj junaj
mamoj. 22 Tial, ho Oholiba, tiele diras la Sinjoro, la
Eternulo: Jen Mi instigos kontraŭ vin viajn amistojn,
de kiuj via animo tediĝis, kaj Mi venigos ilin sur vin
de ĉirkaŭe: 23 la Babelanojn, kaj ĉiujn Ĥaldeojn el
Pekod, el Ŝoa, kaj el Koa, kune kun ĉiuj filoj de Asirio,
la ĉarmajn junulojn, la estrojn kaj urboregantojn, la
potenculojn kaj eminentulojn, ĉiujn lertajn rajdistojn.
24 Kaj ili venos kontraŭ vin kun hakiloj, sur ĉevaloj kaj
sur ĉaroj, kaj kun granda amaso da popolo; ili ĉirkaŭos
vin de ĉiuj flankoj en kirasoj, kun ŝildoj kaj kaskoj;
kaj Mi transdonos vin al ilia juĝo, kaj ili juĝos vin
laŭ sia maniero. 25 Kaj Mi direktos kontraŭ vin Mian
indignon, kaj ili agos kun vi kolere, ili detranĉos vian
nazon kaj viajn orelojn, kaj via restaĵo falos de glavo;
ili forprenos viajn filojn kaj viajn filinojn, kaj via
restaĵo estos ekstermita per fajro. 26 Ili deprenos de
vi viajn vestojn kaj forprenos viajn ornamaĵojn. 27 Kaj
Mi faros finon al via malĉastado kaj al viaj malvirtoj el
la lando Egipta, kaj vi ne plu levos al ili viajn okulojn,
kaj Egiptujon vi ne plu rememoros. 28 Ĉar tiele diras
la Sinjoro, la Eternulo: Jen Mi transdonos vin en la
manojn de tiuj, kiujn vi ekmalamis, en la manojn
de tiuj, de kiuj via animo tediĝis. 29 Kaj ili agos kun
vi malame, kaj forprenos ĉion, kion vi laborakiris,
kaj ili lasos vin nuda kaj senkovra; kaj malkaŝiĝos
la nudeco de via malĉastado, kaj viaj malvirtoj kaj
viaj malĉastaĵoj. 30 Tio estos farita al vi pro tio, ke vi
malĉastis laŭ la ekzemplo de la nacioj kaj malpurigis
vin per iliaj idoloj. 31 Vi iris laŭ la vojo de via fratino,
tial Mi donos ŝian kalikon en vian manon. 32 Tiele
diras la Sinjoro, la Eternulo: Vi trinkos la kalikon de
via fratino, la profundan kaj larĝan; vi estos mokata
kaj insultata pli, ol oni povas elporti. 33 Vi fariĝos

plena de ebrieco kaj malĝojo, ĉar kaliko de teruro
kaj ruinigo estas la kaliko de via fratino Samario. 34
Kaj vi eltrinkos ĝin ĝisfunde, kaj vi ĉirkaŭlekos ĝiajn
rompopecetojn, kaj vi disŝiros vian bruston; ĉar Mi
tion parolis, diras la Sinjoro, la Eternulo. 35 Tial tiele
diras la Sinjoro, la Eternulo: Pro tio, ke vi forgesis
Min kaj forĵetis Min malantaŭ vian dorson, tial suferu
nun pro viaj malvirtoj kaj pro viaj malĉastaĵoj. 36
Kaj la Eternulo diris al mi: Ho filo de homo! ĉu vi
volas juĝi Oholan kaj Oholiban kaj montri al ili iliajn
abomenindaĵojn? 37 Ĉar ili adultis, kaj sango estas
sur iliaj manoj; ili adultis kun siaj idoloj; kaj siajn
infanojn, kiujn ili naskis al Mi, ili trairigis por ili tra
fajro, kiel manĝaĵon por ili. 38 Ankoraŭ ĉi tion ili faris
al Mi: ili malpurigis Mian sanktejon en tiu tempo,
kaj malsanktigis Miajn sabatojn; 39 kaj, buĉinte siajn
infanojn por siaj idoloj, ili en la sama tago venis en
Mian sanktejon, por malsanktigi ĝin; jen tiel ili agis
en Mia domo. 40 Ili ankaŭ sendis, por inviti homojn
el malproksime, al kiuj sendito estis sendita; kaj ili
venis, tiuj, por kiuj vi vin lavis, kolerigis viajn okulojn,
kaj ornamis vin per ornamaĵoj, 41 kaj sidiĝis sur
luksa lito, antaŭ kiu estis aranĝita tablo, kaj sur ĝin
vi metis Mian incenson kaj Mian oleon. 42 Kaj tie
estis aŭdata ĝojkriado de homamaso, kaj al la granda
amaso da homoj venis ankaŭ ebriuloj el la dezerto, kaj
metis braceletojn sur iliajn manojn kaj belajn kronojn
sur iliajn kapojn. 43 Mi diris pri la maljuniĝinta
en adultado: Ŝi alkutimiĝis al la malĉastado kaj ne
povas ĉesi. 44 Oni venadis al ŝi, kiel oni venas al
malĉastistino; tiel oni venadis al Ohola kaj al Oholiba,
la malĉastulinoj. 45 Sed la homoj virtaj juĝos ilin laŭ
la juĝo kontraŭ adultulinoj kaj laŭ la juĝo kontraŭ
sangoverŝantinoj; ĉar ili estas adultulinoj, kaj sango
estas sur iliaj manoj. 46 Ĉar tiele diras la Sinjoro, la
Eternulo: Venigu kontraŭ ilin homamason, kaj oni
elmetu ilin al ruinigo kaj rabado. 47 Kaj la amaso
mortigu ilin per ŝtonoj kaj haku ilin per siaj glavoj;
iliajn filojn kaj iliajn filinojn oni mortigu, kaj iliajn
domojn oni forbruligu per fajro. 48 Kaj Mi faros finon
al la malĉastado en la lando, kaj tio estos averto por
ĉiuj virinoj, ke ili ne agu simile al via malĉastado. 49
Kaj oni metos vian malĉastadon sur vin, kaj vi portos
sur vi la pekojn pri viaj idoloj; kaj vi ekscios, ke Mi
estas la Sinjoro, la Eternulo.

**24** Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo en la naŭa
jaro, en la deka monato, en la deka tago de la
monato, dirante: 2 Ho filo de homo! enskribu al vi
la nomon de ĉi tiu tago, ĝuste de ĉi tiu tago; la reĝo
de Babel atingis Jerusalemon ĝuste en ĉi tiu tago.
3 Kaj prezentu parabolon al la domo malobeema,
kaj diru al ili: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo:
Starigu kaldronon, starigu, kaj verŝu en ĝin akvon. 4
Enkolektu en ĝin ĝiajn pecojn, ĉiujn bonajn pecojn, la
lumbojn kaj ŝultrojn; per plej bonaj ostoj plenigu ĝin.
5 Prenu plej bonan ŝafaĵon, metu suben vicon da ostoj;
boligu bone, ke ankaŭ la ostoj kuiriĝu en ĝi. 6 Tial tiele
diras la Sinjoro, la Eternulo: Ve al la sangavida urbo,
al la kaldrono, kies sedimento restas en ĝi kaj kies
sedimento ne eliras el ĝi! pecon post peco elĵetu el ĝi,
ne elektu lote. 7 Ĉar ĝia sango estas en ĝi; sur nudan
rokon ĝi verŝis ĝin, ne verŝis ĝin sur la teron, kie polvo
povus ĝin kovri. 8 Por venigi sur ĝin Mian koleron,
por fari venĝon, Mi verŝos ĝian sangon sur nudan
rokon, por ke ĝi ne estu kovrita. 9 Tial tiele diras
la Sinjoro, la Eternulo: Ve al la sangavida urbo! Mi
ankaŭ aranĝos grandan brulolignaron. 10 Multigu la
lignon, ekbruligu la fajron, plenkuiru la viandon, bone
spicu, ke eĉ la ostoj brulu. 11 Kaj starigu la malplenan
kaldronon sur ĝiaj karboj, por ke ĝi fariĝu varmega,
por ke ĝia kupro brulruĝiĝu kaj ĝia malpuraĵo en ĝi
fandiĝu kaj ĝia sedimento malaperu. 12 Sed obstina
estas la sedimento, ne eliras el ĝi; multe estas da
sedimento, eĉ en la fajro restas ĝia sedimento. 13
En via malpuraĵo estas malvirtaĵo; kiel ajn Mi penis
purigi vin, vi tamen ne puriĝis de via malpuraĵo;
ankaŭ vi ne plu puriĝos, ĝis Mi kvietigos sur vi Mian
koleron. 14 Mi, la Eternulo, parolis, kaj tio venos, kaj
Mi tion plenumos; Mi ne prokrastos, ne indulgos, ne
kompatos; laŭ via konduto kaj laŭ viaj agoj Mi juĝos
vin, diras la Sinjoro, la Eternulo. 15 Kaj aperis al mi
vorto de la Eternulo, dirante: 16 Ho filo de homo!
jen per plago Mi forprenos de vi tion, kio estas plej
kara por viaj okuloj; sed vi ne plendu, kaj ne ploru,
kaj ne elfluigu larmojn. 17 Ĝemu mallaŭte; funebran
ceremonion ne faru, sed vian kapornamon metu sur
vin, kaj viajn ŝuojn metu sur viajn piedojn, ne kovru
vian buŝon, kaj ne manĝu panon de funebrantoj. 18
Mi parolis al la popolo matene, kaj vespere mortis
mia edzino; kaj en la sekvanta tago mi agis tiel, kiel
estis ordonite al mi. 19 Kaj la popolo diris al mi: Ĉu
vi ne diros al ni, kion signifas por ni tio, kion vi

faras? 20 Kaj mi diris al ili: Aperis al mi vorto de la
Eternulo, dirante: 21 Diru al la domo de Izrael: Tiele
diras la Sinjoro, la Eternulo: Jen Mi malsanktigos
Mian sanktejon, la forton de via gloro, la ĝuon de viaj
okuloj, kaj la ĉarmaĵon de via animo; kaj viaj filoj kaj
viaj filinoj, kiujn vi forlasis, falos de glavo. 22 Kaj vi
agos, kiel mi agis: vian buŝon vi ne kovros, kaj panon
de funebrantoj vi ne manĝos. 23 Kaj via kapornamo
estos sur via kapo, kaj viaj ŝuoj estos sur viaj piedoj;
vi ne funebros kaj ne ploros, sed vi konsumiĝados
pro viaj malbonagoj kaj ĝemados unu al alia. 24 Kaj
Jeĥezkel estos por vi antaŭsigno: ĉion, kion li faris, vi
ankaŭ faros; kiam tio venos, vi ekscios, ke Mi estas
la Sinjoro, la Eternulo. 25 Kaj koncerne vin, ho filo
de homo: en la tago, kiam Mi forprenos de ili ilian
forton, la ĝojon de ilia beleco, la ĝuon de iliaj okuloj,
la ĉarmaĵon de ilia animo, iliajn filojn kaj iliajn filinojn
— 26 en tiu tago venos al vi forsaviĝinto, por transdoni
sciigon al viaj oreloj; 27 en tiu tago malfermiĝos via
buŝo antaŭ la forsaviĝinto, kaj vi ekparolos, kaj vi
ne plu silentos, kaj vi estos antaŭsigno por ili; kaj ili
ekscios, ke Mi estas la Eternulo.

**25** Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante:
2 Ho filo de homo, turnu vian vizaĝon al la
Amonidoj, kaj profetu pri ili; 3 kaj diru al la Amonidoj:
Aŭskultu la vorton de la Sinjoro, la Eternulo: Tiele
diras la Sinjoro, la Eternulo: Pro tio, ke vi diras pri
Mia sanktejo: Ha, ha! ĝi estas malsanktigita; kaj pri la
lando de Izrael: Ĝi estas dezertigita; kaj pri la domo
de Jehuda: Ili estas forkondukitaj en kaptitecon — 4
pro tio jen Mi transdonos vin kiel posedaĵon al la filoj
de la oriento, kaj ili starigos ĉe vi siajn tendarojn kaj
aranĝos ĉe vi siajn loĝejojn; ili manĝos viajn fruktojn,
kaj ili trinkos vian lakton. 5 Kaj Mi faros el Raba stalon
por kameloj, kaj el la lando de la Amonidoj ripozejon
por ŝafoj; kaj vi ekscios, ke Mi estas la Eternulo. 6
Ĉar tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Pro tio, ke vi
aplaŭdis per la manoj kaj frapis per la piedoj kaj kun
plena kora malestimo ĝojis pri la lando de Izrael —
7 pro tio jen Mi etendos Mian manon kontraŭ vin
kaj transdonos vin al la nacioj por disrabo, kaj Mi
ekstermos vin el inter la popoloj, malaperigos vin el
inter la landoj, kaj pereigos vin; kaj vi ekscios, ke Mi
estas la Eternulo. 8 Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo:
Pro tio, ke Moab kaj Seir diras: Jen la domo de Jehuda
estas kiel ĉiuj nacioj — 9 pro tio Mi malfermos la
flankon de Moab en la urboj, en ĝiaj limaj urboj, la
belan landon de Bet-Jeŝimot, Baal-Meon, kaj Kirjataim;
10 kaj Mi donos tion kune kun la Amonidoj al la filoj
de la oriento kiel posedaĵon, por ke la Amonidoj ne
plu estu rememorataj inter la popoloj. 11 Kaj kontraŭ
Moab Mi faros juĝon; kaj ili ekscios, ke Mi estas la
Eternulo. 12 Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Pro
tio, ke Edom faris venĝon al la domo de Jehuda kaj
forte kulpiĝis per sia venĝo kontraŭ ili — 13 pro tio
tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Mi etendos Mian
manon kontraŭ la landon de Edom, kaj ekstermos
en ĝi la homojn kaj brutojn, kaj faros ĝin dezerto;
de Teman ĝis Dedan ili falos de glavo. 14 Kaj Mi
faros Mian venĝon kontraŭ Edom per la mano de Mia
popolo Izrael; kaj ili agos kun la Edomidoj konforme
al Mia kolero kaj indigno, por ke ĉi tiuj ekkonu Mian
venĝon, diras la Sinjoro, la Eternulo. 15 Tiele diras la
Sinjoro, la Eternulo: Pro tio, ke la Filiŝtoj agis venĝe
kaj faris la venĝon kun plena kora malbondeziro kaj
faris ekstermon laŭ sia eterna malamo — 16 pro tio
tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Jen Mi etendos Mian
manon kontraŭ la Filiŝtojn, ekstermos la Keretidojn,
kaj pereigos la restintojn ĉe la bordo de la maro. 17
Kaj Mi faros kontraŭ ili grandan venĝon kun kolerega
puno; kaj ili ekscios, ke Mi estas la Eternulo, kiam Mi
faros Mian venĝon kontraŭ ili.

**26** En la dek-unua jaro, en la unua tago de la monato,
aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante: 2 Ho
filo de homo! pro tio, ke Tiro diras pri Jerusalem: Ha,
ha! ĝi estas frakasita, la pordo de la popoloj, ĝi turnas
sin al mi, mi pleniĝos de ĝia dezertiĝo — 3 pro tio tiele
diras la Sinjoro, la Eternulo: Jen Mi iras kontraŭ vin,
ho Tiro, kaj Mi levos kontraŭ vin multe da nacioj, kiel
maro levas siajn ondojn. 4 Kaj ili detruos la muregojn
de Tiro kaj disrompos ĝiajn turojn; kaj Mi forbalaos
de ĝi ĝian polvon, kaj Mi faros ĝin nuda roko. 5 Loko
por sternado de retoj ĝi fariĝos meze de la maro, ĉar
Mi tion parolis, diras la Sinjoro, la Eternulo; kaj ĝi
fariĝos rabaĵo por la nacioj. 6 Kaj ĝiaj filinoj, kiuj
estas sur la kampo, estos mortigitaj per glavo; kaj ili
ekscios, ke Mi estas la Eternulo. 7 Ĉar tiele diras la
Sinjoro, la Eternulo: Jen Mi venigos kontraŭ Tiron de
norde Nebukadnecaron, reĝon de Babel, la reĝon de
reĝoj, kun ĉevaloj, ĉaroj, kaj rajdistoj, kun homamaso
kaj multe da popolo. 8 Viajn filinojn sur la kampo li
mortigos per glavo; li faros kontraŭ vi bastionojn, li

ŝutaranĝos ĉirkaŭ vi remparojn, kaj starigos kontraŭ
vi siajn ŝildojn; 9 kaj li starigos siajn muregrompilojn
kontraŭ viaj muregoj, kaj viajn turojn li detruos per
siaj hakiloj. 10 Pro la multo de siaj ĉevaloj li kovros
vin per polvo; de la bruo de la rajdistoj, radoj, kaj
ĉaroj ektremos viaj muregoj, kiam li eniros en viajn
pordegojn, kiel oni eniras en urbon trarompitan. 11
Per la hufoj de siaj ĉevaloj li dispremos ĉiujn viajn
stratojn; vian popolon li mortigos per glavo, kaj la
monumentojn de via forto li ĵetos sur la teron. 12 Ili
disrabos vian havon kaj diskaptos viajn komercaĵojn;
ili detruos viajn murojn, ili disrompos viajn belajn
domojn; viajn ŝtonojn, vian lignon, kaj vian teron ili
ĵetos en la akvon. 13 Mi ĉesigos la laŭtan sonadon
de viaj kantoj, kaj la voĉo de viaj harpoj ne plu estos
aŭdata. 14 Mi faros vin nuda roko; vi fariĝos loko por
sternado de retoj, vi ne plu estos rekonstruata; ĉar Mi,
la Eternulo, tion parolis, diras la Sinjoro, la Eternulo.
15 Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo, pri Tiro: Vere, de
la bruo de via falado, de la ĝemado de viaj vunditoj,
kiam meze de vi estos farata mortigado, ektremos
la insuloj. 16 Kaj malsupreniros de siaj tronoj ĉiuj
princoj de la maro, ili demetos de si sian purpuron kaj
siajn broditajn vestojn; timo ilin atakos; ili sidiĝos sur
la tero, tremos ĉiuminute, kaj eksentos teruron pro vi.
17 Kaj ili ekkantos pri vi funebran kanton, kaj diros pri
vi: Kiele vi pereis, vi, loĝata de maristoj, glora urbo,
kiu estis forta sur la maro, ĝi kaj ĝiaj loĝantoj, kiuj
ĵetadis timon sur ĉiujn loĝantojn de la mara regiono!
18 Nun ektremos la maraj regionoj en la tago de via
falo, kaj la insuloj sur la maro konsterniĝos pro via
finiĝo. 19 Ĉar tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Kiam
Mi faros vin urbo dezerta simila al la urboj neloĝataj,
kiam Mi levos sur vin la abismon kaj granda akvo vin
kovros, 20 tiam Mi mallevos vin al tiuj, kiuj iris en la
tombon, al la popolo eterna, kaj Mi puŝos vin en la
profundon subteran, en la eternan dezerton, al tiuj,
kiuj iris en la tombon, por ke vi ne plu estu loĝata;
tiam Mi restarigos belecon sur la tero de la vivantoj.
21 Mi neniigos vin, kaj vi ne plu ekzistos; oni serĉos
vin, sed ne plu trovos en eterneco, diras la Sinjoro, la
Eternulo.

**27** Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante:
2 Vi, ho filo de homo, ekkantu funebran kanton
pri Tiro; 3 kaj diru al Tiro, kiu sidas ĉe la enirejo de
la maro kaj kiu komercas kun la popoloj sur multaj
insuloj: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Ho Tiro, vi
diras: Mi estas perfektaĵo de beleco! 4 En la koro de
la maro estas viaj limoj; viaj konstruintoj faris vin
perfekte bela. 5 El cipresoj de Senir ili konstruis por
vi ĉiujn viajn tabulojn, cedrojn de Lebanon ili prenis,
por fari viajn mastojn. 6 El kverkoj de Baŝan ili faris
viajn remilojn, viajn benkojn ili faris el eburo kaj el
bukso de la insuloj de la Kitidoj. 7 El delikata brodita
tolo Egipta estis viaj veloj, kaj tio estis ankaŭ via
standardo; blua kaj purpura ŝtofo de la insuloj de Eliŝa
estis viaj kovrotukoj. 8 La loĝantoj de Cidon kaj Arvad
estis viaj remistoj; viajn proprajn kompetentulojn
vi havis, ho Tiro, kaj ili estis viaj ŝipgvidistoj. 9 La
plejaĝuloj de Gebal kaj ĝiaj kompetentuloj estis ĉe vi
kalfatristoj; ĉiaj ŝipoj de la maro kaj iliaj ŝipistoj estis
ĉe vi, por servi al via komercado. 10 Persoj, Ludidoj,
kaj Putidoj estis en via armeo, kiel viaj militistoj,
pendigis ĉe vi siajn ŝildojn kaj kaskojn, kaj estis via
beleco. 11 La filoj de Arvad kaj via militistaro staris sur
viaj muregoj ĉirkaŭe kaj estis gardistoj sur viaj turoj;
siajn ŝildojn ili pendigis ĉirkaŭe sur viaj muregoj, kaj
ili perfektigis vian belecon. 12 Tarŝiŝ komercis kun
vi per multo da diversaj valoraĵoj; arĝenton, feron,
stanon, kaj plumbon ĝi alportadis al via komercejo. 13
Javan, Tubal, kaj Meŝeĥ komercis kun vi, alportante
al vi kiel komercaĵojn homajn animojn kaj kuprajn
vazojn. 14 El Togarma oni alportadis al via komercejo
ĉevalojn, rajdoĉevalojn, kaj mulojn. 15 La filoj de
Dedan komercis kun vi; sur multaj insuloj estis viaj
komercaĵoj; eburon kaj ebonon ili vendadis al vi
siaflanke. 16 Sirio prenadis de vi komerce la multon
de viaj faritaĵoj; rubenojn, purpurajn kaj broditajn
ŝtofojn, delikatan tolon, koralojn, kaj kristalojn ili
alportadis al via komercejo. 17 Judujo kaj la lando
de Izrael komercis kun vi; pro viaj komercaĵoj ili
alportadis al vi tritikon de Minit, vakson, mielon,
oleon, kaj balzamon. 18 Damasko donadis al vi komerce
kontraŭ la multo de viaj faritaĵoj multe da diversaj
valoraĵoj, vinon el Ĥelbon, kaj plej blankan lanon. 19
Dan, Javan, kaj Meuzal alportadis al via komercejo
ŝtalaĵojn, kasion, kaj bonodoran kanon. 20 Dedan
komercis kun vi per belaj vestoj por rajdado. 21
Arabujo kaj ĉiuj princoj de Kedar komercis kun vi,
donante al vi ŝafidojn, ŝafojn, kaj kaprojn kontraŭ
viaj komercaĵoj. 22 La komercistoj el Ŝeba kaj Raama
komercis kun vi; la plej bonajn aromaĵojn, ĉiajn
multekostajn ŝtonojn, kaj oron ili alportadis al via

komercejo. 23 Ĥaran, Kane, kaj Eden, la komercistoj el
Ŝeba, Asirio, kaj Kilmad komercis kun vi; 24 ili komercis
kun vi per belegaj ŝtofoj, purpuraj kaj broditaj tukoj,
kestoj da multekostaj ŝtofoj, ĉirkaŭligitaj per ŝnuroj
kaj cedrokovritaj. 25 Ŝipoj el Tarŝiŝ estis la ĉefaj en
via komercado; kaj vi fariĝis tre riĉa kaj honorata sur
la maro. 26 Sur grandaj akvoj kondukadis vin viaj
remistoj; sed orienta vento disrompos vin meze de
la maro. 27 Viaj riĉaĵoj, viaj komercaĵoj, viaj foiraĵoj,
viaj ŝipanoj kaj viaj ŝipestroj, viaj kalfatristoj, la
kondukantoj de via komercado, ĉiuj militistoj, kiuj
estas ĉe vi, kaj la tuta homamaso, kiu estas ĉe vi,
falos en la mezon de la maro en la tago de via pereo.
28 De la laŭta kriado de viaj ŝipestroj ekskuiĝos viaj
ĉirkaŭaĵoj. 29 Kaj de siaj ŝipoj malsupreniros ĉiuj
remistoj, la ŝipanoj, ĉiuj ŝipestroj, kaj stariĝos sur la
tero, 30 kaj ili laŭte krios pri vi, kaj ploros maldolĉe
kaj metos polvon sur siajn kapojn kaj rulos sin en
cindro; 31 kaj ili faros al si pro vi kalvaĵon, ĉirkaŭzonos
sin per sakaĵo, kaj ploros pri vi kun maldolĉa koro
maldolĉan ploron. 32 Kaj en sia ĝemado ili ekkantos
pri vi funebran kanton, kaj diros: Kiu iam fariĝis tiel
silenta sur la maro, kiel Tiro? 33 Kiam viaj komercaĵoj
venadis de la maroj, vi satigadis multajn popolojn;
per la abundo de viaj riĉaĵoj kaj viaj komercaĵoj vi
riĉigadis la reĝojn de la tero. 34 Sed kiam sur la maroj
vi estis ĵetegata en la profundon de la akvo, falis ĉe
vi via komercado kaj via tuta homomulto. 35 Ĉiuj
loĝantoj de la insuloj eksentis teruron pri vi, iliaj
reĝoj ektremis, kaj konsterno estas sur ilia vizaĝo. 36
La komercistoj de la aliaj popoloj ekfajfis pri vi; vi
neniiĝis, kaj neniam plu ekzistos.

**28** Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante:
2 Ho filo de homo, diru al la reganto de Tiro:
Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Pro tio, ke via koro
fieriĝis, kaj vi diris: Mi estas dio, mi sidas sur dia
trono en la mezo de la maroj; dum vi estas homo, sed
ne dio, kvankam vi rigardas vian koron kiel koron
de dio; 3 kvazaŭ vi estus pli saĝa ol Daniel kaj nenio
estus kaŝita antaŭ vi; 4 kvazaŭ per via saĝeco kaj
via kompetenteco vi akirus al vi la potencon kaj
kolektus oron kaj arĝenton en vian trezorejon; 5
kvazaŭ per via granda saĝeco en via komercado vi
grandigus vian riĉecon, kaj via koro fieriĝis pro via
riĉeco: 6 pro tio tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Ĉar
vi rigardas vian koron kiel koron de dio, 7 tial jen
Mi venigos kontraŭ vin fremdulojn, la plej terurajn
el la popoloj; kaj ili nudigos siajn glavojn kontraŭ la
belaĵojn de via saĝeco kaj malaperigos vian brilon.
8 En pereon ili puŝos vin, kaj vi mortos en la mezo
de la maro per morto de buĉitoj. 9 Ĉu antaŭ via
mortiganto vi diros: Mi estas dio; dum vi estas ne
dio, sed homo en la mano de via mortiganto? 10 Per
morto de necirkumciditoj vi mortos de la manoj de
fremduloj; ĉar Mi tion parolis, diras la Sinjoro, la
Eternulo. 11 Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo,
dirante: 12 Ho filo de homo, ekkantu funebran kanton
pri la reĝo de Tiro, kaj diru al li: Tiele diras la Sinjoro,
la Eternulo: Vi estas sigelo de perfekteco, plena de
saĝo kaj plej alta grado de beleco. 13 Vi estis en Eden,
la ĝardeno de Dio; ĉiaspecaj multekostaj ŝtonoj vin
kovris: rubeno, topazo, diamanto, sukceno, berilo,
jaspiso, safiro, smeraldo, ametisto, kaj oro estis la
ornamo de viaj tamburinoj kaj flutoj; ĉio estis preta
en la tago de via kreiĝo. 14 Vi estas kerubo, kiu sin
etendas kaj protektas; kaj Mi metis vin sur la sanktan
monton de Dio, kie vi iradis inter fajraj ŝtonoj. 15
Vi estis perfekta en via konduto de post la tago de
via kreiĝo, ĝis troviĝis en vi malbonago. 16 Pro la
grandeco de via komercado via interno pleniĝis de
maljusteco, kaj vi pekis; tial Mi deĵetos vin de la monto
de Dio, kaj malaperigos vin, ho kerubo protektanto,
el inter la fajraj ŝtonoj. 17 De via beleco fieriĝis via
koro, pro via majesteco vi perdis vian saĝon; tial Mi
ĵetos vin sur la teron kaj faros vin mokataĵo antaŭ la
reĝoj. 18 Per la multo de viaj malbonagoj kaj per via
malhonesta komercado vi malhonoris vian sanktejon;
kaj Mi eligos el vi fajron, kiu ekstermos vin, kaj Mi
faros vin cindro sur la tero antaŭ la okuloj de ĉiuj
viaj vidantoj. 19 Ĉiuj, kiuj konas vin inter la popoloj,
eksentos teruron pri vi; vi neniiĝis, kaj neniam plu
ekzistos. 20 Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo,
dirante: 21 Ho filo de homo, turnu vian vizaĝon al
Cidon, kaj profetu pri ĝi, 22 kaj diru: Tiele diras la
Sinjoro, la Eternulo: Jen Mi iras kontraŭ vin, ho Cidon;
kaj Mi gloriĝos inter vi, kaj oni ekscios, ke Mi estas la
Eternulo, kiam Mi faros kontraŭ ĝi juĝon kaj montros
sur ĝi Mian sanktecon. 23 Mi sendos sur ĝin peston,
kaj sangoverŝadon sur ĝiajn stratojn, kaj falos en ĝi
mortigitoj de glavo, kiu estos direktita kontraŭ ĝin de
ĉiuj flankoj; kaj oni ekscios, ke Mi estas la Eternulo. 24
Kaj ĝi ne plu estos por la domo de Izrael pikanta dorno
nek doloriganta pikilo pli ol ĉiuj malbondezirantaj

najbaroj; kaj oni ekscios, ke Mi estas la Sinjoro, la
Eternulo. 25 Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Kiam Mi
kolektos la domon de Izrael el la popoloj, inter kiujn
ĝi estis disĵetita, kaj montros sur ĝi Mian sanktecon
antaŭ la okuloj de la nacioj, tiam ili loĝos sur sia tero,
kiun Mi donis al Mia servanto Jakob. 26 Kaj ili loĝos
sur ĝi sendanĝere, kaj konstruos domojn kaj plantos
vinberĝardenojn; jes, ili loĝos en sendanĝereco, kiam
Mi faros juĝon kontraŭ ĉiuj iliaj malbondezirantoj
ĉirkaŭ ili; kaj ili ekscios, ke Mi, la Eternulo, estas ilia
Dio.

**29** En la deka jaro, en la deka monato, en la dek-
dua tago de la monato, aperis al mi vorto de
la Eternulo, dirante: 2 Ho filo de homo, turnu vian
vizaĝon al Faraono, reĝo de Egiptujo, kaj profetu pri li
kaj pri la tuta Egiptujo. 3 Parolu, kaj diru: Tiele diras
la Sinjoro, la Eternulo: Jen Mi iras kontraŭ vin, ho
Faraono, reĝo de Egiptujo, granda drako, kiu kuŝas
meze de siaj riveroj, kaj diras: La rivero estas mia, kaj
mi faris ĝin por mi. 4 Mi metos hokojn en vian buŝon,
Mi alkroĉos la fiŝojn de viaj riveroj al via skvamaro,
kaj Mi eltiros vin el viaj riveroj kune kun ĉiuj fiŝoj de
viaj riveroj, kiuj estas alkroĉitaj al via skvamaro. 5
Mi ĵetos vin en la dezerton, vin kaj ĉiujn fiŝojn de
viaj riveroj; sur la kampon vi falos, oni vin ne levos
kaj ne enkolektos; al la bestoj de la tero kaj al la
birdoj de la ĉielo Mi transdonos vin kiel manĝaĵon.
6 Kaj ekscios ĉiuj loĝantoj de Egiptujo, ke Mi estas
la Eternulo; pro tio, ke ili estis kana apogo por la
domo de Izrael: 7 kiam ili kaptis vin per la mano,
vi fendiĝis kaj trapikis al ili la tutan flankon; kaj
kiam ili apogis sin sur vi, vi rompiĝis kaj traboris al
ili la tutajn lumbojn. 8 Tial tiele diras la Sinjoro, la
Eternulo: Jen Mi venigos sur vin glavon kaj ekstermos
ĉe vi la homojn kaj la brutojn. 9 Kaj la lando Egipta
fariĝos dezerto kaj ruinoj; kaj oni ekscios, ke Mi estas
la Eternulo; pro tio, ke li diris: La rivero estas mia,
kaj mi ĝin faris. 10 Tial jen Mi iras kontraŭ vin kaj
kontraŭ viajn riverojn, kaj Mi faros el la lando Egipta
ruinojn, absolutajn ruinojn, de Migdol ĝis Sevene,
ĝis la limo de Etiopujo. 11 Ne trairos ĝin piedo de
homo, nek piedo de bruto trairos ĝin, kaj ĝi ne estos
loĝata dum kvardek jaroj. 12 Kaj Mi faros la landon
Egiptan dezerto inter la aliaj dezertaj landoj, kaj ĝiaj
urboj inter la aliaj ruinigitaj urboj estos dezertaj
dum kvardek jaroj; kaj Mi disĵetos la Egiptojn inter la
popolojn kaj dispelos ilin en diversajn landojn. 13 Ĉar
tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Post paso de kvardek
jaroj Mi kolektos la Egiptojn el inter la popoloj, kien
ili estis disĵetitaj; 14 kaj Mi revenigos la forkaptitajn
Egiptojn, kaj revenigos ilin en la landon Patros, en la
landon de ilia deveno, kaj ili tie estos humila regno.
15 Ĝi estos humila inter la aliaj regnoj, kaj ĝi ne plu
sin tenos alte super la nacioj; Mi faros ĝin malgranda,
por ke ĝi ne regu super la nacioj. 16 Kaj ĝi ne plu
estos por la domo de Izrael fidataĵo, rememoriganta
iliajn malbonagojn, kiam ili sin turnadis al ĝi; kaj
oni ekscios, ke Mi estas la Sinjoro, la Eternulo. 17 En
la dudek-sepa jaro, en la unua monato, en la unua
tago de la monato, aperis al mi vorto de la Eternulo,
dirante: 18 Ho filo de homo! Nebukadnecar, reĝo
de Babel, ŝarĝis sian militistaron per granda laboro
kontraŭ Tiro, tiel, ke ĉiuj kapoj senhariĝis kaj ĉiuj
ŝultroj defrotiĝis; kaj tamen nek li nek lia militistaro
ricevis rekompencon antaŭ Tiro pro la laboro, kiun li
faris antaŭ ĝi. 19 Tial tiele diras la Sinjoro, la Eternulo:
Jen Mi donos al Nebukadnecar, reĝo de Babel, la
landon Egiptan, por ke li forportu ĝiajn riĉaĵojn
kaj faru en ĝi rabadon kaj diskapton; kaj tio estos
rekompenco por lia militistaro. 20 Rekompence pro la
laboro, kiun li faris, Mi donis al li la landon Egiptan;
ĉar ili laboris por Mi, diras la Sinjoro, la Eternulo. 21
En tiu tempo Mi elkreskigos kornon al la domo de
Izrael, kaj al vi Mi donos liberecon de parolado inter
ili; kaj ili ekscios, ke Mi estas la Eternulo.

**30** Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante:
2 Ho filo de homo, profetu, kaj diru: Tiele diras
la Sinjoro, la Eternulo: Plorkriu: Ve al la tago! 3 Ĉar
proksima estas la tago, jes, proksima estas la tago de la
Eternulo, malluma tago; venas la tempo de la nacioj. 4
Venos glavo sur Egiptujon, kaj tremo atakos Etiopujon,
kiam mortigitoj falos en Egiptujo kaj oni forprenos
ĝiajn riĉaĵojn kaj detruos ĝiajn fundamentojn. 5 La
Etiopoj, la Putidoj, kaj la Ludidoj, kaj ĉiuj diversgentaj
popoloj, kaj Kub, kaj la filoj de la lando de interligo
kune kun ili falos de glavo. 6 Tiele diras la Eternulo:
Falos la helpantoj de Egiptujo, kaj malaltiĝos la fiereco
de ĝia forto; de Migdol ĝis Sevene oni falos en ĝi de
glavo, diras la Sinjoro, la Eternulo. 7 Kaj ĝi dezertiĝos
kiel la aliaj dezertaj landoj, kaj ĝiaj urboj estos inter
la aliaj ruinigitaj urboj. 8 Kaj oni ekscios, ke Mi estas
la Eternulo, kiam Mi aperigos fajron en Egiptujo kaj

ĉiuj ĝiaj helpantoj estos frakasitaj. 9 En tiu tempo
senditoj de Mi iros sur ŝipoj, por ektimigi Etiopujon,
kiu estis ekster danĝero; kaj tremo ilin atakos, kiel
en la tempo de Egiptujo; ĉar la tempo venas. 10
Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Mi neniigos la
homomulton en Egiptujo per Nebukadnecar, reĝo de
Babel. 11 Li kune kun sia popolo, la plej terura el la
nacioj, estos venigitaj, por pereigi la landon; kaj ili
nudigos siajn glavojn kontraŭ Egiptujon kaj plenigos
la landon per mortigitoj. 12 Kaj la riverojn Mi faros
sektero, kaj la landon Mi transdonos en la manojn
de homoj malbonaj; kaj Mi ruinigos la landon, kaj
ĉion, kio estas en ĝi, per la manoj de fremduloj; Mi,
la Eternulo, tion parolis. 13 Tiele diras la Sinjoro,
la Eternulo: Mi ekstermos la idolojn kaj neniigos la
malverajn diojn en Nof, kaj ne plu estos princo el
la lando Egipta, kaj Mi venigos timon sur la landon
Egiptan. 14 Mi ruinigos Patroson, Mi ekbruligos fajron
en Coan, kaj Mi faros juĝon en No. 15 Mi elverŝos Mian
koleron sur la Egiptan fortikaĵon Sin, kaj Mi ekstermos
la homomulton en No. 16 Mi ekbruligos fajron en
Egiptujo; forte ektremos Sin, No estos trarompita,
kaj Nof havos ĉiutagan angoron. 17 La junuloj de
Aven kaj de Pi-Beset falos de glavo, kaj la virinoj iros
en forkaptitecon. 18 En Taĥpanĥes mallumiĝos la
tago, kiam Mi rompos tie la jugon de Egiptujo, kaj
malaperos en ĝi la fiereco de ĝia forto; mallumo ĝin
kovros, kaj ĝiaj filinoj iros en forkaptitecon. 19 Kaj Mi
faros juĝon kontraŭ Egiptujo; kaj oni ekscios, ke Mi
estas la Eternulo. 20 En la dek-unua jaro, en la unua
monato, en la sepa tago de la monato, aperis al mi
vorto de la Eternulo, dirante: 21 Ho filo de homo!
Mi rompis la brakon de Faraono, reĝo de Egiptujo;
kaj jen ĝi ne estas bandaĝita, por resaniĝi, kaj ĝi
ne estas ĉirkaŭligita, ke ĝi ricevu forton, por teni
glavon. 22 Tial tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Jen
Mi iros kontraŭ Faraonon, reĝon de Egiptujo, kaj Mi
frakasos liajn brakojn, la sanan kaj la rompitan, kaj
Mi elfaligos la glavon el lia mano. 23 Kaj Mi disĵetos
la Egiptojn inter la naciojn, kaj Mi dispelos ilin en
diversajn landojn. 24 Kaj Mi fortigos la brakojn de la
reĝo de Babel kaj metos Mian glavon en lian manon;
sed la brakojn de Faraono Mi frakasos, kaj ĉi tiu ĝemos
antaŭ li, kiel ĝemas morte-vundito. 25 Mi fortigos la
brakojn de la reĝo de Babel, sed la brakoj de Faraono
falos; kaj oni ekscios, ke Mi estas la Eternulo, kiam Mi
metos Mian glavon en la manon de la reĝo de Babel
kaj li eltiros ĝin kontraŭ la landon Egiptan. 26 Kaj Mi
disĵetos la Egiptojn inter la naciojn kaj dispelos ilin
en diversajn landojn; kaj ili ekscios, ke Mi estas la
Eternulo.

**31** En la dek-unua jaro, en la tria monato, en la
unua tago de la monato, aperis al mi vorto de la
Eternulo, dirante: 2 Ho filo de homo, diru al Faraono,
reĝo de Egiptujo, kaj al lia tuta popolo: Al kiu vi
similigas vin en via grandeco? 3 Jen Asirio estis kiel
cedro sur Lebanon, kun belaj branĉoj, kun densa
foliaro, kun alta kresko, kaj ĝia supro estis inter la
nuboj. 4 Akvo elkreskigis ĝin, la profundo altigis ĝin,
ĉirkaŭante ĝian junan trunkon per siaj riveroj kaj
sendante siajn fluojn al ĉiuj arboj de la kampo. 5 Tial
ĝi fariĝis pli alta ol ĉiuj arboj de la kampo; ĝi ricevis
multe da branĉoj, kaj ĝiaj branĉoj longiĝis, ĉar ĝi havis
multe da akvo, por disetendiĝi. 6 Sur ĝiaj branĉoj
havis siajn nestojn ĉiaj birdoj de la ĉielo, sub ĝiaj
branĉoj naskis idojn ĉiaj bestoj de la kampo, kaj sub
ĝia ombro loĝis ĉiaj grandaj popoloj. 7 Kaj ĝi estis bela
per sia grandeco kaj per la longeco de siaj branĉoj,
ĉar ĝiaj radikoj troviĝis apud abunda akvo. 8 La cedroj
en la ĝardeno de Dio ne estis pli altaj ol ĝi, la cipresoj
ne estis egalaj al ĝiaj branĉoj, la platanoj ne povis sin
kompari kun ĝiaj branĉoj; neniu arbo en la ĝardeno
de Dio estis simila al ĝi per sia beleco. 9 Mi faris ĝin
bela per la multo de ĝiaj branĉoj; kaj ĉiuj Edenaj arboj,
kiuj estas en la ĝardeno de Dio, enviis ĝin. 10 Tial
tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Pro tio, ke ĝi tro
altiĝis kaj levis sian supron inter la nubojn kaj ĝia
koro fieriĝis pro ĝia alteco — 11 pro tio Mi transdonos
ĝin en la manon de la plej potenca el la nacioj, kiu
agos kun ĝi konforme al ĝia malboneco kaj elpuŝos
ĝin. 12 Kaj elhakos ĝin fremduloj, la plej teruraj el la
nacioj, kaj disĵetos ĝin; sur la montojn kaj sur ĉiujn
valojn falos ĝiaj branĉoj, kaj ĝiaj branĉetoj rompiĝos
sur ĉiuj torentoj de la lando, kaj ĉiuj popoloj de la tero
foriros el sub ĝia ombro kaj forlasos ĝin. 13 Kaj sur ĝia
renversiĝinta trunko sidos ĉiaj birdoj de la ĉielo, kaj
sur ĝiaj branĉoj sidos ĉiaj bestoj de la kampo, 14 por
ke neniu el la arboj apudakvaj fieriĝu pri sia alteco,
nek levu sian supron inter la nubojn, kaj por ke neniu
akvonutrata arbo leviĝu super ilin; ĉar ĉiuj ili estas
destinitaj al la morto, en la profundon subteran, kune
kun la homoj, kiuj iris en la tombon. 15 Tiele diras la
Sinjoro, la Eternulo: En la tago, kiam ĝi iros en Ŝeolon,

Mi faros funebron, Mi fermos pro ĝi la abismon, Mi
haltigos ĝiajn riverojn, ke stariĝu la grandaj akvoj,
Mi mallumigos pro ĝi Lebanonon, kaj ĉiuj arboj de la
kampo estos afliktitaj. **(Sheol h7585)** 16 Per la bruo de ĝia
falo Mi ektremigos la naciojn, kiam Mi puŝos ĝin en
Ŝeolon al tiuj, kiuj iris en la tombon; kaj konsoliĝos
en la profundo subtera ĉiuj arboj de Eden, la plej
elektitaj kaj plej bonaj de Lebanon, ĉiuj akvonutrataj.
**(Sheol h7585)** 17 Ĉar ankaŭ ili iros en Ŝeolon, al tiuj, kiuj
estis mortigitaj de glavo, kaj ĝiaj kunuloj, kiuj sidis
sub ĝia ombro inter la nacioj. **(Sheol h7585)** 18 Al kiu
el la arboj de Eden vi estis simila per majesto kaj
grandeco? tamen kune kun la arboj de Eden vi estos
ĵetita en la profundon subteran; kaj vi kuŝos meze de
necirkumciditoj kune kun tiuj, kiuj mortis de glavo.
Tio estas dirita pri Faraono kaj pri lia tuta granda
popolo, diras la Sinjoro, la Eternulo.

**32** En la dek-dua jaro, en la dek-dua monato, en la
unua tago de la monato, aperis al mi vorto de la
Eternulo, dirante: 2 Ho filo de homo, ekkantu funebran
kanton pri Faraono, reĝo de Egiptujo, kaj diru al li: Vi
estas kiel leonido inter la nacioj, vi estas kiel drako en
la maroj, vi saltas en viaj riveroj, vi movmalklarigas la
akvon per viaj piedoj, vi malkvietigas iliajn riverojn. 3
Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Mi ĵetos sur vin
Mian reton per granda amaso da popoloj, kaj ili eltiros
vin per Mia reto. 4 Kaj Mi ĵetos vin sur la teron, sur
nekovritan kampon Mi vin ĵetos, kaj Mi sidigos sur
vi ĉiajn birdojn de la ĉielo, kaj Mi satigos de vi la
bestojn de la tuta tero. 5 Mi disĵetos vian karnon sur la
montojn, kaj Mi plenigos la valojn per via kadavraĵo.
6 La landon de via naĝado Mi malsekigos per via sango
ĝis la montoj, kaj la valoj estos plenaj de vi. 7 Kiam vi
estingiĝos, Mi kovros la ĉielon kaj senlumigos ĝiajn
stelojn, la sunon Mi kovros per nubo, kaj la luno
ne havos sian lumon. 8 Ĉiujn fontojn de lumo en la
ĉielo Mi senlumigos pro vi, kaj mallumon Mi metos
sur vian landon, diras la Sinjoro, la Eternulo. 9 Mi
maltrankviligos la korojn de multaj popoloj, kiam
Mi venigos la scion pri via pereo inter la naciojn,
en landojn, kiujn vi ne konis. 10 Mi teruros pro vi
multajn popolojn, kaj iliaj reĝoj ektremos pro vi, kiam
Mi svingos Mian glavon antaŭ iliaj vizaĝoj, kaj ĉiu el
ili ĉiuminute tremos pri sia vivo en la tago de via falo.
11 Ĉar tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: La glavo de la
reĝo de Babel venos sur vin. 12 Per la glavo de fortuloj
Mi faligos vian multenombran popolon; ĉiuj ili estas
la plej teruraj el la nacioj, kaj ili neniigos la belecon de
Egiptujo, kaj ĝia tuta homomulto estos ekstermita. 13
Mi pereigos ĉiujn ĝiajn brutojn apud la abundaj akvoj,
kaj ilin ne plu malklarigos piedo de homo nek la hufoj
de bruto. 14 Tiam Mi ripozpurigos iliajn akvojn, kaj
iliajn riverojn Mi fluigos kiel oleon, diras la Sinjoro, la
Eternulo. 15 Kiam Mi faros la landon Egiptan dezerto,
kaj la lando perdos ĉion, kion ĝi havis, kiam Mi
mortigos ĉiujn, kiuj loĝas en ĝi, tiam oni ekscios,
ke Mi estas la Eternulo. 16 Tio estas funebra kanto,
kiun oni kantos; la filinoj de la nacioj ĝin kantos, pri
Egiptujo kaj pri ĝia tuta grandnombra popolo ili ĝin
kantos, diras la Sinjoro, la Eternulo. 17 En la dek-dua
jaro, en la dek-kvina tago de la sama monato, aperis al
mi vorto de la Eternulo, dirante: 18 Ho filo de homo,
priploru la popolon de Egiptujo, kaj puŝu ĝin kaj la
filinojn de potencaj nacioj en la profundon subteran
kune kun tiuj, kiuj iris en la tombon. 19 Ĉu vi estas pli
bona ol iu? falu, kaj kuŝu kun la necirkumciditoj. 20
Inter tiuj, kiuj mortis de glavo, ili falos; al la glavo
ĝi estas transdonita; oni tiros ĝin kaj ĝian tutan
grandnombran popolon. 21 Ekparolos al ĝi la potencaj
herooj el meze de Ŝeol, kiuj kune kun ĝiaj helpantoj
malsupreniris kaj ekkuŝis necirkumciditaj, mortigitaj
de glavo. **(Sheol h7585)** 22 Tie estas Asirio kaj ĝia tuta
homomulto; ĉirkaŭe de ĝi estas ĝiaj tomboj; ĉiuj ili
estas mortigitaj, falis de glavo. 23 Ĝiaj tomboj estas en
la profundo de la terinterno, kaj ĝia homomulto estas
ĉirkaŭ ĝia tombo; ĉiuj ili estas mortigitaj, falintaj de
glavo, ili, kiuj ĵetadis ĉirkaŭ si teruron sur la tero de
la vivantoj. 24 Tie estas Elam kaj ĝia tuta homomulto,
ĉirkaŭe estas ĝiaj tomboj; ĉiuj ili estas mortigitoj, kiuj
falis de glavo kaj necirkumcidite malsupreniris en
la profundon subteran, la samaj, kiuj ĵetadis ĉirkaŭ
si teruron sur la tero de la vivantoj; ili portis sian
honton kune kun tiuj, kiuj iris en la tombon. 25 Meze
de mortigitoj estas donita kuŝejo al ĝi kun ĝia tuta
homomulto; ĉirkaŭe estas iliaj tomboj; ĉiuj ili estas
necirkumciditaj, mortigitaj de glavo; ĉar ili ĵetadis
ĉirkaŭ si teruron sur la tero de la vivantoj, tial ili
portis sian honton kun tiuj, kiuj iris en la tombon,
kaj ili estas metitaj inter la mortigitojn. 26 Tie estas
Meŝeĥ kaj Tubal kaj ilia tuta homomulto, ĉirkaŭe estas
iliaj tomboj; ĉiuj ili estas necirkumciditaj, mortigitaj
de glavo, ĉar ili ĵetadis ĉirkaŭ si teruron sur la tero de
la vivantoj. 27 Ili ne kuŝas kun la herooj, kiuj falis de

necirkumciditoj kaj iris en Ŝeolon kun siaj bataliloj kaj
metis siajn glavojn sub siajn kapojn; iliaj malbonagoj
restis sur iliaj ostoj, ĉar kiel fortuloj ili ĵetadis ĉirkaŭ
si teruron sur la tero de la vivantoj. **(Sheol h7585)** **28** Kaj
vi ankaŭ estos frakasita meze de la necirkumciditoj,
kaj kuŝos kun tiuj, kiuj estas mortigitaj de glavo. **29**
Tie estas Edom kun siaj reĝoj kaj kun ĉiuj siaj princoj,
kiuj malgraŭ sia forteco estas ĵetitaj al tiuj, kiuj falis
de glavo; ili kuŝas kun la necirkumciditoj, kaj kun tiuj,
kiuj iris en la tombon. **30** Tie estas ĉiuj princoj de la
nordo, kaj ĉiuj Cidonanoj, kiuj malsupreniris kune
kun la mortigitoj; ili hontas pri la teruro, kiun ĵetadis
ilia forto; ili kuŝas necirkumciditaj kun tiuj, kiuj falis
de glavo, kaj ili portas sian honton kun tiuj, kiuj iris
en la tombon. **31** Ilin Faraono vidos, kaj li konsoliĝos
pri sia tuta popolo, mortigita de glavo, Faraono kaj lia
tuta militistaro, diras la Sinjoro, la Eternulo. **32** Ĉar
Mi ĵetos Mian teruron sur la teron de la vivantoj; kaj
inter la necirkumciditojn, kune kun tiuj, kiuj estas
mortigitaj de glavo, estos metita Faraono kun sia tuta
homomulto, diras la Sinjoro, la Eternulo.

**33** Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante:
**2** Ho filo de homo, parolu al la filoj de via popolo,
kaj diru al ili: Se Mi venigos glavon kontraŭ iun
landon, kaj la popolo de la lando prenos el sia mezo
unu viron kaj starigos lin ĉe si kiel observanton; **3** kaj
se li, vidante la glavon, kiu iras kontraŭ la landon,
ekblovos per trumpeto kaj avertos la popolon; **4** kaj
se iu, aŭdinte la sonon de la trumpeto, ne akceptos
la averton, kaj la glavo venos kaj prenos lin, tiam
lia sango estos sur lia kapo: **5** li aŭdis la sonon de
la trumpeto kaj tamen ne atentis la averton, tial lia
sango estos sur lia kapo; sed kiu atentos la averton,
tiu savos sian vivon. **6** Sed se la observanto vidos
la venantan glavon kaj ne blovos per trumpeto, kaj
la popolo ne estos avertita, kaj la glavo venos kaj
prenos la vivon de iu: tiam ĉi tiu estos prenita pro sia
peko, sed lian sangon Mi repostulos el la mano de la
observanto. **7** Kaj nun, ho filo de homo, Mi starigis
vin kiel observanton por la domo de Izrael; kaj kiam
vi aŭdos el Mia buŝo vorton, avertu ilin en Mia nomo.
**8** Kiam Mi diros pri la malvirtulo: Malvirtulo, vi devas
morti; kaj vi ne parolos, por averti la malvirtulon
kontraŭ lia konduto: tiam li, la malvirtulo, mortos pro
sia malvirteco, sed lian sangon Mi repostulos el via
mano. **9** Sed se vi avertis la malvirtulon kontraŭ lia
konduto, ke li deturnu sin de ĝi, kaj li ne deturnis sin
de sia konduto: tiam li mortos pro sia malvirteco kaj
vi savos vian vivon. **10** Kaj vi, ho filo de homo, diru
al la domo de Izrael: Vi diras: Niaj kulpoj kaj pekoj
estas sur ni, kaj de ili ni konsumiĝas; kiel do ni povas
vivi? **11** Diru do al ili: Kiel Mi vivas, diras la Sinjoro,
la Eternulo, Mi deziras ne la morton de malvirtulo,
sed ke la malvirtulo deturnu sin de sia vojo kaj restu
vivanta. Deturnu vin, deturnu vin de viaj malbonaj
vojoj! kial vi mortu, ho domo de Izrael? **12** Kaj vi, ho
filo de homo, diru al la filoj de via popolo: La virteco
de virtulo ne savos lin en la tago de lia krimo, kaj
malvirtulo ne falos pro sia malvirteco en la tago, kiam
li deturnos sin de sia malvirteco; tiel same virtulo en
la tago de sia peko ne povas resti vivanta kun ĝi. **13** Se
Mi diros al la virtulo, ke li vivos, kaj li, fidante sian
virtecon, faros krimon: tiam lia tuta virteco ne estos
memorata, kaj li mortos pro sia krimo, kiun li faris. **14**
Kaj se Mi diros al la malvirtulo, ke li mortos, sed li
deturnos sin de sia peko kaj agados juste kaj virte; **15**
se la malvirtulo redonos la garantiaĵon, repagos la
rabitaĵon, agados laŭ la leĝoj de la vivo, ne farante
malbonagojn: tiam li restos vivanta kaj ne mortos. **16**
Ĉiuj liaj pekoj, kiujn li faris, ne estos rememorataj:
li agas juste kaj virte, kaj tial li restos vivanta. **17**
Dume la filoj de via popolo diras: Ne ĝusta estas la
vojo de la Sinjoro! Sed en efektiveco ilia vojo estas
ne ĝusta. **18** Se virtulo deturnas sin de sia virteco
kaj faras malbonagojn, li mortas pro ili; **19** kaj se
malvirtulo deturnas sin de sia malvirteco kaj agas
juste kaj virte, pro tio li restas vivanta. **20** Kaj vi diras:
Ne ĝusta estas la vojo de la Sinjoro! Ĉiun el vi Mi juĝas
konforme al lia konduto, ho domo de Izrael. **21** En la
dek-dua jaro de nia forkaptiteco, en la kvina tago de
la deka monato, venis al mi forsaviĝinto el Jerusalem,
kaj diris: La urbo estas disbatita. **22** Sed la mano de la
Eternulo aperis super mi en la vespero antaŭ la veno
de la forsaviĝinto, kaj malfermis mian buŝon, antaŭ ol
tiu venis al mi matene; kaj mia buŝo malfermiĝis, kaj
mi ne plu devis silenti. **23** Kaj aperis al mi vorto de la
Eternulo, dirante: **24** Ho filo de homo! la loĝantoj de
tiuj dezertaj lokoj sur la tero de Izrael parolas tiele:
Abraham estis unu sola homo, kaj ricevis herede la
landon; sed ni estas multo, des pli apartenas al ni la
lando kiel heredaĵo. **25** Tial diru al ili: Tiele diras la
Sinjoro, la Eternulo: Vi manĝas kun sango, kaj viajn
okulojn vi levas al viaj idoloj, kaj sangon vi verŝas; kaj

tamen vi volas posedi la landon? 26 Vi apogas vin
sur via glavo, vi faras abomenindaĵon, vi malpurigas
unu la edzinon de la alia; kaj tamen vi volas posedi
la landon? 27 Diru al ili jenon: Tiele diras la Sinjoro,
la Eternulo: Kiel Mi vivas, tiuj, kiuj troviĝas sur la
ruinoj, falos de glavo; kiu estas sur la kampo, tiun
Mi transdonos kiel manĝaĵon al la bestoj; kaj tiuj,
kiuj estas en fortikaĵoj kaj en kavernoj, mortos de
pesto. 28 Kaj Mi faros la landon absoluta dezerto,
kaj malaperos ĝia fiera forto; kaj la montoj de Izrael
dezertiĝos tiel, ke neniu tie pasos. 29 Kaj oni ekscios,
ke Mi estas la Eternulo, kiam Mi plene dezertigos la
landon pro ĉiuj iliaj abomenindaĵoj, kiujn ili faris.
30 Kaj koncerne vin, ho filo de homo, la filoj de via
popolo interparolas pri vi ĉe la muroj kaj ĉe la pordoj
de la domoj, kaj unu al la alia parolas jene: Iru, kaj
aŭskultu, kia estas la vorto, kiu eliris de la Eternulo!
31 Kaj ili venas al vi kiel al popola kunveno, kaj Mia
popolo sidiĝas antaŭ vi, kaj aŭskultas viajn vortojn,
sed ne plenumas ilin; ĉar voluptajn kantojn ili faras el
tio en siaj buŝoj, kaj ilia koro celas nur profiton. 32 Vi
estas por ili kiel volupta kanto, kiel homo kun bela
voĉo kaj bone kantanta; ili aŭskultas viajn vortojn,
sed ne plenumas ilin. 33 Sed kiam plenumiĝos tio,
kio devas plenumiĝi, tiam ili ekscios, ke profeto estis
meze de ili.

**34** Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante:
2 Ho filo de homo, profetu pri la paŝtistoj de
Izrael, profetu, kaj diru al ili, al la paŝtistoj: Tiele diras
la Sinjoro, la Eternulo: Ve al la paŝtistoj de Izrael,
kiuj paŝtas sin mem! ĉu ne la ŝafojn devas paŝti la
paŝtistoj? 3 La grasaĵon vi manĝas, per la lano vi vin
vestas, la grasigitan ŝafon vi buĉas; sed la ŝafojn vi ne
paŝtas. 4 La malfortajn vi ne flegas, malsanan vi ne
kuracas, vunditan vi ne bandaĝas, forerarintan vi ne
revenigas, perditan vi ne serĉas; sed vi regas super ili
maldelikate kaj kruele. 5 Kaj ili diskuris, ĉar ili ne
havas paŝtiston; kaj ili fariĝis manĝaĵo por ĉiuj bestoj
de la kampo, ili diskuris. 6 Erarvagas Miaj ŝafoj sur
ĉiuj montoj kaj sur ĉiuj altaj montetoj, kaj sur la tutan
teron diskuris Miaj ŝafoj, kaj neniu demandas pri
ili, neniu ilin serĉas. 7 Tial, ho paŝtistoj, aŭskultu la
vorton de la Eternulo: 8 Kiel Mi vivas, diras la Sinjoro,
la Eternulo: pro tio, ke Miaj ŝafoj fariĝis rabataĵo, kaj
pro foresto de paŝtisto Miaj ŝafoj fariĝis manĝaĵo por
ĉiuj bestoj de la kampo, kaj Miaj paŝistoj ne serĉis
Miajn ŝafojn, kaj la paŝtistoj paŝtis sin mem, sed Miajn
ŝafojn ili ne paŝtis — 9 pro tio, ho paŝtistoj, aŭskultu
la vorton de la Eternulo: 10 Tiele diras la Sinjoro, la
Eternulo: Jen Mi iras kontraŭ la paŝtistojn, kaj Mi
elpostulos Miajn ŝafojn el iliaj manoj, kaj Mi forprenos
de ili la paŝtadon de ŝafoj, kaj la paŝtistoj jam ne plu
paŝtos sin mem, kaj Mi savos Miajn ŝafojn el ilia buŝo,
por ke ili ne plu estu manĝaĵo por ili. 11 Ĉar tiele diras
la Sinjoro, la Eternulo: Jen Mi venos, kaj Mi serĉos
Miajn ŝafojn kaj esploros ilin. 12 Kiel paŝtisto esploras
sian ŝafaron, kiam li alvenas al siaj diskurintaj ŝafoj,
tiel Mi esploros Miajn ŝafojn; kaj Mi savos ilin el ĉiuj
lokoj, kien ili diskuris en la tago nuba kaj malluma. 13
Mi elkondukos ilin el inter la popoloj, Mi kolektos
ilin el la diversaj landoj, Mi revenigos ilin sur ilian
teron; kaj Mi paŝtos ilin sur la montoj de Izrael, en la
valoj, kaj sur ĉiuj loĝeblaj lokoj de la tero. 14 Sur bona
paŝtejo Mi ilin paŝtos, kaj sur la altaj montoj de Izrael
estos ilia loĝloko; tie ili ripozos en bona restejo, kaj
paŝtiĝos sur grasa paŝtejo, sur la montoj de Izrael. 15
Mi paŝtos Miajn ŝafojn, kaj Mi ripozigos ilin, diras
la Sinjoro, la Eternulo. 16 La ŝafon perdiĝintan Mi
elserĉos, la forpelitan Mi revenigos, la vunditan Mi
bandaĝos, la malsanan Mi fortigos; sed la grasan kaj
fortan Mi ekstermos; Mi paŝtos kun justeco. 17 Kaj pri
vi, ho Miaj ŝafoj, tiele diras la Sinjoro, la Eternulo:
Jen Mi faros juĝon inter ŝafo kaj ŝafo, al virŝafoj kaj
virkaproj. 18 Ĉu ne sufiĉas al vi, ke vi paŝtiĝas sur
bona paŝtejo? la restaĵon sur via paŝtejo vi dispremas
per viaj piedoj! Ĉu ne sufiĉas, ke vi trinkas puran
akvon? la restaĵon vi movmalklarigas per viaj piedoj!
19 Kaj Miaj ŝafoj devas manĝi tion, kio estas dispremita
per viaj piedoj, kaj trinki tion, kio estas malklarigita
per viaj piedoj. 20 Tial tiele diras al ili la Sinjoro,
la Eternulo: Jen Mi venos, kaj Mi faros juĝon inter
ŝafo grasa kaj ŝafo malgrasa. 21 Ĉar vi puŝas per la
flanko kaj per la ŝultro kaj frapas per viaj kornoj ĉiujn
malfortajn, ĝis vi forpelas ilin eksteren, 22 Mi helpos
al Miaj ŝafoj, kaj ili ne plu estos prirabataj, kaj Mi faros
juĝon inter ŝafo kaj ŝafo. 23 Kaj Mi starigos super ili
unu paŝtiston, kiu paŝtos ilin, Mian servanton David;
li paŝtos ilin, kaj li estos por ili paŝtisto. 24 Kaj Mi,
la Eternulo, estos por ili Dio, kaj Mia servanto David
estos princo inter ili; Mi, la Eternulo, tion parolis.
25 Kaj Mi faros kun ili interligon de paco, kaj Mi
malaperigos ĉiujn sovaĝajn bestojn el la lando, por
ke oni povu loĝi en la dezerto sendanĝere kaj dormi

en la arbaroj. 26 Kaj Mi faros ilin kaj la ĉirkaŭaĵon
de Mia monteto objekto de beno, kaj Mi sendados
pluvon en ĝia tempo, tio estos pluvoj de beno. 27 Kaj
la arbo de la kampo donados siajn fruktojn, kaj la tero
donados siajn produktaĵojn, kaj ili estos sur sia tero
ekster danĝero; kaj ili ekscios, ke Mi estas la Eternulo,
kiam Mi rompos la stangojn de ilia jugo, kaj savos
ilin el la manoj de tiuj, kiuj sklavigis ilin. 28 Kaj ili ne
plu estos prirabataj de la nacioj, kaj la bestoj de la
tero ne manĝegos ilin; kaj ili loĝos sendanĝere, kaj
neniu teruros ilin. 29 Kaj Mi aranĝos por ili gloran
plantadon, kaj ili ne plu estos ekstermataj de malsato
en la lando, kaj ili ne plu havos malhonoron inter la
nacioj. 30 Kaj oni ekscios, ke Mi, la Eternulo, ilia Dio,
estas kun ili, kaj ke ili, la domo de Izrael, estas Mia
popolo, diras la Sinjoro, la Eternulo. 31 Kaj vi, homoj,
estas Miaj ŝafoj, la ŝafoj de Mia paŝtejo, kaj Mi estas
via Dio, diras la Sinjoro, la Eternulo.

**35** Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante: 2
Ho filo de homo, turnu vian vizaĝon al la monto
Seir, kaj profetu pri ĝi; 3 kaj diru al ĝi: Tiele diras
la Sinjoro, la Eternulo: Jen Mi iras kontraŭ vin, ho
monto Seir, kaj Mi etendos Mian manon kontraŭ vin
kaj faros vin absoluta dezerto. 4 Viajn urbojn Mi
ruinigos, kaj vi mem dezertiĝos; kaj vi ekscios, ke Mi
estas la Eternulo. 5 Ĉar vi havis eternan malamon, kaj
elmetadis la Izraelidojn al glavo en la tempo de ilia
malfeliĉo, kiam iliaj malbonagoj finiĝis: 6 tial, kiel
Mi vivas, diras la Sinjoro, la Eternulo, Mi faros vin
sanganta, kaj sanga venĝo vin persekutos; ĉar vi ne
malamis sangon, tial sanga venĝo vin persekutos.
7 Kaj Mi faros la monton Seir absoluta dezerto, kaj
Mi malaperigos sur ĝi ĉian pasanton. 8 Mi plenigos
ĝiajn altaĵojn de mortigitoj: sur viaj montetoj, en
viaj valoj, kaj en ĉiuj viaj terfendoj kuŝos falintoj,
mortigitaj de glavo. 9 Mi faros vin eterna dezerto, kaj
viaj urboj ne estos loĝataj; kaj vi ekscios, ke Mi estas la
Eternulo. 10 Pro tio, ke vi diris: Tiuj du popoloj kaj du
landoj apartenos al mi, kaj ni ekposedos ilin, kvankam
tie estas la Eternulo: 11 tial, kiel Mi vivas, diras la
Eternulo, Mi agos kun vi konforme al via kolero, kaj al
via envio, kiun vi elmontris en via malamo kontraŭ ili;
kaj oni ekkonos Min ĉe ili, kiam Mi juĝos vin. 12 Kaj vi
ekscios, ke Mi, la Eternulo, aŭdis ĉiujn viajn insultojn,
kiujn vi eldiris pri la montoj de Izrael, dirante: Ili estas
dezertigitaj kaj transdonitaj al ni, por ke ni konsumu
ilin. 13 Vi faris vin grandaj antaŭ Mi per via buŝo, kaj
vi multe parolis kontraŭ Mi; Mi tion aŭdis. 14 Tiele
diras la Sinjoro, la Eternulo: Kiam la tuta tero ĝojos,
Mi faros vin dezerto. 15 Kiel vi ĝojis pri la heredaĵo
de la domo de Izrael, kiam ĝi dezertiĝis, tiel Mi agos
kun vi: vi fariĝos dezerto, ho monto Seir kaj la tuta
Edomujo; kaj oni ekscios, ke Mi estas la Eternulo.

**36** Kaj vi, ho filo de homo, profetu pri la montoj
de Izrael, kaj diru: Ho montoj de Izrael, aŭskultu
la vorton de la Eternulo! 2 Tiele diras la Sinjoro, la
Eternulo: Ĉar la malamiko diras pri vi: Ha, ha! ankaŭ
la eternaj altaĵoj fariĝis niaj posedaĵoj; 3 tial profetu,
kaj diru: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Pro tio,
ĝuste pro tio, ke oni dezertigis vin kaj premis vin
de ĉiuj flankoj, por ke vi fariĝu heredaĵo por la aliaj
nacioj, kaj oni prenis vin sur sian langon kaj la popoloj
vin kalumnias, 4 tial, ho montoj de Izrael, aŭskultu
la vorton de la Sinjoro, la Eternulo: Tiele diras la
Sinjoro, la Eternulo, al la montoj kaj al la montetoj, al
la terfendoj kaj al la valoj, al la dezertigitaj ruinoj kaj
al la forlasitaj urboj, kiuj fariĝis rabataĵo kaj mokataĵo
por la aliaj nacioj ĉirkaŭe; 5 tiele diras la Sinjoro,
la Eternulo: Kredu, ke en la fajro de Mia fervoro Mi
parolis pri la aliaj nacioj kaj pri la tuta Edomujo, kiuj
alproprigis al si Mian landon kun tutkora ĝojo kaj kun
mokado, por prirabi ĝiajn produktaĵojn; 6 tial profetu
pri la lando de Izrael, kaj diru al la montoj kaj al la
montetoj, al la terfendoj kaj al la valoj: Tiele diras la
Sinjoro, la Eternulo: Jen Mi parolis en Mia fervoro kaj
en Mia kolero, pro tio, ke vi suferas malhonoron de
la nacioj; 7 tial tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Mi
ĵuras per levo de Mia mano, ke la nacioj, kiuj estas
ĉirkaŭ vi, suferos malhonoron; 8 sed vi, montoj de
Izrael, elkreskigos viajn branĉojn kaj alportados viajn
fruktojn al Mia popolo Izrael; ĉar ili baldaŭ venos.
9 Ĉar jen Mi venos al vi, Mi turnos Mian vizaĝon al
vi, kaj vi estos prilaborataj kaj prisemataj; 10 kaj Mi
aperigos sur vi multe da homoj, la tutan domon de
Izrael, ilin ĉiujn; kaj la urboj fariĝos loĝataj, kaj la
ruinoj estos rekonstruataj; 11 Mi aperigos sur vi multe
da homoj kaj brutoj, kaj ili multiĝos kaj fruktoriĉiĝos;
kaj Mi faros vin loĝataj, kiel en via antaŭa tempo,
kaj Mi bonfarados al vi pli ol en via komenco; kaj vi
ekscios, ke Mi estas la Eternulo. 12 Mi venigos sur vin
homojn, Mian popolon Izrael; kaj ili posedos vin, kaj
vi estos ilia heredaĵo, kaj vi ne plu seninfanigos ilin.

**13** Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Pro tio, ke oni
diras al vi: Vi formanĝas homojn, kaj vi seninfanigis
vian popolon — **14** pro tio vi nun ne plu manĝos
homojn, kaj vian popolon vi ne plu seninfanigos,
diras la Sinjoro, la Eternulo. **15** Kaj Mi ne plu aŭdigos
kontraŭ vi insultadon de la nacioj, kaj vi ne plu havos
malhonoron de la flanko de popoloj, kaj vian popolon
vi ne plu seninfanigos, diras la Sinjoro, la Eternulo.
**16** Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante: **17**
Ho filo de homo! la domo de Izrael, loĝante sur sia
tero, malpurigis ĝin per sia konduto kaj per siaj agoj;
kiel la malpuraĵo de virino dum ŝia monataĵo estis
antaŭ Mi ilia konduto. **18** Kaj Mi elverŝis sur ilin Mian
koleron pro la sango, kiun ili verŝadis sur la teron, kaj
pro tio, ke ili malpurigadis ĝin per siaj idoloj; **19** kaj
Mi disĵetis ilin inter la naciojn, kaj ili estis dispelitaj
en la diversajn landojn; konforme al ilia konduto kaj
al iliaj agoj Mi faris juĝon kontraŭ ili. **20** Kaj ili aliĝis
al la nacioj, al kiuj ili venis, kaj malsanktigis Mian
sanktan nomon tiel, ke oni diris pri ili: Ĉu tio estas la
popolo de la Eternulo, kiu devis eliri el Lia lando? **21**
Sed Mi domaĝis Mian sanktan nomon, kiun la domo
de Izrael malsanktigis inter la nacioj, kien ili venis. **22**
Tial diru al la domo de Izrael: Tiele diras la Sinjoro,
la Eternulo: Ne pro vi Mi agas, ho domo de Izrael,
sed nur pro Mia sankta nomo, kiun vi malsanktigis
inter la nacioj, kien vi venis. **23** Kaj Mi sanktigos Mian
grandan nomon, malsanktigitan ĉe la nacioj, kiun
vi malsanktigis inter ili; kaj la nacioj ekscios, ke Mi
estas la Eternulo, diras la Sinjoro, la Eternulo, kiam
Mi montros sur vi Mian sanktecon antaŭ iliaj okuloj.
**24** Mi prenos vin el inter la nacioj, Mi kolektos vin el
ĉiuj landoj, kaj Mi venigos vin en vian landon. **25** Kaj
Mi aspergos vin per pura akvo, kaj vi puriĝos de ĉiuj
viaj malpuraĵoj, kaj de ĉiuj viaj idoloj Mi purigos vin.
**26** Kaj Mi donos al vi koron novan, kaj spiriton novan
Mi metos en vin; Mi eligos el via korpo la ŝtonan
koron, kaj Mi donos al vi koron karnan. **27** Kaj Mian
spiriton Mi metos en vin, kaj Mi faros, ke vi agados
laŭ Miaj leĝoj, kaj Miajn ordonojn vi observados kaj
plenumados. **28** Kaj vi loĝos en la lando, kiun Mi donis
al viaj patroj; kaj vi estos Mia popolo, kaj Mi estos via
Dio. **29** Kaj Mi liberigos vin de ĉiuj viaj malpuraĵoj; Mi
vokos la grenon kaj multigos ĝin, kaj Mi ne venigos
sur vin malsaton. **30** Mi multigos la fruktojn de la
arboj kaj la produktaĵojn de la kampo, por ke vi ne
plu havu antaŭ la nacioj honton pri malsato. **31** Tiam
vi rememoros vian malbonan konduton kaj viajn
nebonajn agojn, kaj vi faros al vi mem riproĉojn pro
viaj malbonagoj kaj pro viaj abomenindaĵoj. **32** Ne pro
vi Mi agas, diras la Sinjoro, la Eternulo; tion vi sciu.
Hontu kaj ruĝiĝu pri via konduto, ho domo de Izrael!
**33** Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: En la tempo, kiam
Mi purigos vin de ĉiuj viaj malbonagoj kaj loĝatigos
la urbojn, kaj la ruinoj estos rekonstruitaj, **34** kaj la
dezertigita tero estos prilaborata anstataŭ tio, ke
ĝi estis dezerto antaŭ la okuloj de ĉiu pasanto: **35**
tiam oni diros: Ĉi tiu dezertigita tero fariĝis kiel la
ĝardeno Eden, kaj la urboj ruinigitaj, dezertigitaj,
kaj detruitaj estas nun fortikigitaj kaj loĝataj. **36**
Kaj ekscios la nacioj, kiuj restos ĉirkaŭ vi, ke Mi,
la Eternulo, rekonstruis la detruitaĵon, priplantis
la dezertigitaĵon; Mi, la Eternulo, tion diris, kaj Mi
tion plenumos. **37** Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo:
Ankoraŭ en tio Mi trovigos Min al la domo de Izrael,
kaj faros al ili: Mi multigos ĉe ili la homojn kiel ŝafojn.
**38** Kiel la sanktaj ŝafoj, kiel la ŝafoj de Jerusalem dum
ĝiaj festoj, tiel la dezertigitaj urboj pleniĝos de amasoj
da homoj; kaj oni ekscios, ke Mi estas la Eternulo.

**37** Aperis super mi la mano de la Eternulo, kaj
elirigis min en la inspiro de la Eternulo, kaj
starigis min meze de ebenaĵo, kiu estis plena de ostoj.
**2** Kaj Li kondukis min ĉirkaŭe ĉirkaŭ ili; estis tre multe
da ili sur la ebenaĵo, kaj ili estis tre sekaj. **3** Kaj Li diris
al mi: Ho filo de homo! ĉu reviviĝos ĉi tiuj ostoj? Mi
respondis: Ho Sinjoro, ho Eternulo, nur Vi tion scias.
**4** Kaj Li diris al mi: Profetu pri ĉi tiuj ostoj, kaj diru al
ili: Ho sekaj ostoj, aŭskultu la vorton de la Eternulo! **5**
Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo, al ĉi tiuj ostoj: Jen
Mi venigos en vin spiriton, kaj vi reviviĝos; **6** kaj Mi
donos al vi tendenojn, Mi kreskigos ĉirkaŭ vi karnon,
Mi kovros vin per haŭto, Mi enmetos en vin spiriton,
kaj vi reviviĝos; kaj vi ekscios, ke Mi estas la Eternulo.
**7** Kaj mi profetis, kiel estis ordonite al mi; kaj kiam mi
eldiris mian profetaĵon, fariĝis bruo kaj tumulto, kaj
la ostoj komencis alproksimiĝadi, ĉiu osto al sia osto.
**8** Kaj mi vidis: jen sur ili estas tendenoj, kaj elkreskis
karno, kaj haŭto kovris ilin supre; sed spirito en ili ne
estis. **9** Kaj Li diris al mi: Profetu al la spirito, profetu,
ho filo de homo, kaj diru al la spirito: Tiele diras la
Sinjoro, la Eternulo: El la kvar ventoj venu, ho spirito,
kaj ekblovu sur ĉi tiujn mortigitojn, por ke ili reviviĝu.
**10** Kaj mi profetis, kiel Li ordonis al mi; kaj eniris en

ilin spirito, kaj ili reviviĝis kaj stariĝis sur siaj piedoj,
tre, tre granda armeo. 11 Kaj Li diris al mi: Ho filo de
homo! ĉi tiuj ostoj estas la tuta domo de Izrael. Jen ili
diras: Sekiĝis niaj ostoj, kaj pereis nia espero, decidita
estas nia sorto. 12 Tial profetu, kaj diru al ili: Tiele
diras la Sinjoro, la Eternulo: Jen Mi malfermos viajn
tombojn kaj elirigos vin el viaj tomboj, ho Mia popolo,
kaj Mi venigos vin en la landon de Izrael. 13 Kaj vi
ekscios, ke Mi estas la Eternulo, kiam Mi malfermos
viajn tombojn kaj elirigos vin el viaj tomboj, ho Mia
popolo. 14 Kaj Mi enmetos Mian spiriton en vin, kaj
vi reviviĝos, kaj Mi aranĝos vin en via lando; kaj vi
ekscios, ke Mi, la Eternulo, tion parolis kaj faris, diras
la Eternulo. 15 Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo,
dirante: 16 Vi, ho filo de homo, prenu al vi lignon, kaj
skribu sur ĝi: De Jehuda, kaj de la Izraelidoj, aliĝintaj
al li. Poste prenu ankoraŭ unu lignon, kaj skribu sur
ĝi: De Jozef, ligno de Efraim, kaj de la tuta domo de
Izrael, kiu aliĝis al li. 17 Kaj aligu ilin al vi unu al la
alia kiel unu lignon, ke ili fariĝu unu en via mano. 18
Kaj kiam la filoj de via popolo demandos vin: Ĉu vi ne
klarigos al ni, kion tio signifas ĉe vi? 19 tiam diru al
ili: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Jen Mi prenos la
lignon de Jozef, kiu estas en la manoj de Efraim kaj de
la triboj de Izrael, kiuj aliĝis al li; kaj Mi aligos ĝin kun
ili al la ligno de Jehuda, kaj Mi faros ilin unu ligno, kaj
ili estos unu en Mia mano. 20 Kaj la lignoj, sur kiuj vi
estos skribinta, estu en via mano antaŭ iliaj okuloj.
21 Kaj diru al ili: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo:
Jen Mi prenos la Izraelidojn el inter la nacioj, kien ili
iris, kaj Mi kolektos ilin de ĉirkaŭe kaj venigos ilin
en ilian landon. 22 Kaj Mi faros ilin unu nacio en la
lando, sur la montoj de Izrael, kaj unu reĝo estos reĝo
por ili ĉiuj; kaj ili ne plu estos du popoloj kaj ne plu
estos dividitaj en du regnojn. 23 Kaj ili ne plu sin
malpurigos per siaj idoloj kaj per siaj abomenindaĵoj
kaj per ĉiuj siaj krimoj; kaj Mi liberigos ilin el ĉiuj
iliaj loĝlokoj, en kiuj ili pekis, kaj Mi purigos ilin; kaj
ili estos Mia popolo, kaj Mi estos ilia Dio. 24 Kaj Mia
servanto David estos reĝo super ili, kaj unu paŝtisto
estos por ili ĉiuj; kaj ili sekvos Miajn decidojn, kaj
Miajn leĝojn ili observos kaj plenumos. 25 Kaj ili loĝos
en la lando, kiun Mi donis al Mia servanto Jakob kaj
en kiu loĝis viaj patroj; kaj ili loĝos en ĝi, ili kaj iliaj
infanoj, kaj la infanoj de iliaj infanoj, eterne; kaj Mia
servanto David estos por ili princo eterne. 26 Kaj
Mi faros kun ili interligon de paco; ĝi estos eterna
interligo kun ili; Mi aranĝos kaj multigos ilin, kaj Mi
starigos Mian sanktejon inter ili por eterne. 27 Kaj Mi
loĝos inter ili; kaj Mi estos ilia Dio, kaj ili estos Mia
popolo. 28 Kaj la nacioj ekscios, ke Mi, la Eternulo,
sanktigas Izraelon, ĉar Mia sanktejo estos inter ili por
eterne.

**38** Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante:
2 Ho filo de homo, turnu vian vizaĝon al Gog,
en la lando Magog, ĉefa princo de Meŝeĥ kaj Tubal,
kaj profetu pri li; 3 kaj diru: Tiele diras la Sinjoro,
la Eternulo: Jen Mi iras kontraŭ vin, ho Gog, ĉefa
princo de Meŝeĥ kaj Tubal. 4 Kaj Mi vagigos vin, Mi
metos buŝbridaĵon en vian buŝon, kaj Mi elirigos vin
kaj vian tutan militistaron, ĉevalojn kaj rajdistojn,
ĉiujn en belegaj vestoj, grandan anaron, en kirasoj kaj
kun ŝildoj, kun glavo en la mano; 5 Persojn, Etiopojn,
kaj Putidojn, ĉiujn kun ŝildoj kaj kaskoj; 6 Gomeron
kun ĉiuj ĝiaj taĉmentoj, la domon de Togarma, de la
nordaj randoj, kun ĉiuj ĝiaj taĉmentoj; multaj popoloj
estos kun vi. 7 Pretigu vin kaj aranĝu vin, vi kaj
ĉiuj homamasoj, kiuj kolektiĝis al vi, kaj vi estu ilia
gvidanto. 8 Post longa tempo vi estos elvokita; en
la lastaj jaroj vi venos en la landon liberigitan el
glavo, al la popolo, kolektita el inter multaj gentoj,
sur la montojn de Izrael, kiuj ĉiam estis dezertaj, al la
popolo, kiu estos elkondukita el inter la gentoj kaj
nun tuta loĝas ekster danĝero. 9 Kaj vi leviĝos, kaj
venos kiel ventego; vi estos kiel nubego, kiu volas
kovri la teron, vi kaj ĉiuj viaj taĉmentoj kaj la multaj
popoloj kun vi. 10 Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo:
En tiu tempo venos en vian koron diversaj deziroj, kaj
vi pripensos malbonajn intencojn. 11 Kaj vi diros: Mi
iros kontraŭ la landon nebaritan, mi iros kontraŭ la
trankvilulojn, kiuj pensas, ke ili loĝas ekster danĝero,
kiuj loĝas ĉiuj sen muroj kaj ne havas riglilojn nek
pordojn; 12 por ke mi faru rabadon kaj kaptu kaptaĵon,
kaj metu la manon sur la denove loĝatajn ruinojn,
kaj sur la popolon, kiu estas rekolektita el inter la
nacioj, okupas sin per brutedukado kaj komercado,
kaj loĝas sur la centro de la tero. 13 Ŝeba kaj Dedan,
kaj la komercistoj de Tarŝiŝ, kaj ĉiuj ĝiaj potenculoj
diros al vi: Ĉu ne por fari rabadon vi venis? ĉu ne
por kapti kaptaĵon vi kolektis vian homomulton, por
forporti arĝenton kaj oron, por preni brutojn kaj
havaĵojn, por fari grandan rabadon? 14 Tial profetu,
ho filo de homo, kaj diru al Gog: Tiele diras la Sinjoro,

la Eternulo: Ĉu vi ne scias pri tiu tempo, kiam Mia
popolo Izrael devas loĝi sendanĝere? 15 Vi venos de
via loko, de la nordaj randoj, vi kaj multaj popoloj kun
vi, ĉiuj rajdante sur ĉevaloj, granda homomulto kaj
potenca armeo; 16 kaj vi iros kontraŭ Mian popolon
Izrael kiel nubo, por kovri la landon. Tio okazos en la
lasta tempo. Mi permesos al vi veni en Mian landon,
por ke la nacioj ekkonu Min, kiam Mi montros sur vi
Mian sanktecon antaŭ iliaj okuloj, ho Gog. 17 Tiele
diras la Sinjoro, la Eternulo: Vi estas ja tiu, pri kiu
Mi parolis en la antikva tempo per Miaj servantoj,
la profetoj de Izrael, kiuj en tiu tempo antaŭdiris la
jarojn, kiam Mi venigos vin sur ilin. 18 En tiu tempo,
kiam Gog venos sur la teron de Izrael, diras la Sinjoro,
la Eternulo, leviĝos Mia kolero kaj Mia indigno. 19 Kaj
en Mia fervoro, en la fajro de Mia kolero Mi decidis,
ke en tiu tempo estos granda tumulto sur la tero
de Izrael; 20 kaj ektremos antaŭ Mi la fiŝoj de la
maro, la birdoj de la ĉielo, la bestoj de la kampo, ĉiuj
rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero, kaj ĉiuj homoj, kiuj
estas sur la tero; kaj renversiĝos la montoj, falos la
rokkrutaĵoj, kaj ĉiuj muroj falos sur la teron. 21 Kaj Mi
vokos kontraŭ lin glavon sur ĉiuj Miaj montoj, diras la
Sinjoro, la Eternulo; ĉiu prenos glavon kontraŭ sian
fraton. 22 Kaj Mi faros kontraŭ li juĝon per pesto kaj
sangoverŝado; Mi sendos pluvegon, ŝtonan hajlon,
fajron, kaj sulfuron sur lin kaj sur liajn taĉmentojn,
kaj sur la multajn popolojn, kiuj estos kun li. 23 Kaj
Mi montros Mian grandecon kaj sanktecon, kaj Mi
konatigos Min antaŭ la okuloj de multaj popoloj; kaj
ili ekscios, ke Mi estas la Eternulo.

**39** Kaj vi, ho filo de homo, profetu pri Gog, kaj diru:
Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Jen Mi iras
kontraŭ vin, ho Gog, ĉefa princo de Meŝeĥ kaj Tubal.
2 Kaj Mi vagigos vin, allogos vin, levos vin de la nordaj
randoj, kaj venigos vin sur la montojn de Izrael. 3 Kaj
Mi elbatos vian pafarkon el via maldekstra mano, kaj
Mi elfaligos viajn sagojn el via dekstra mano. 4 Sur la
montoj de Izrael vi falos, vi kaj ĉiuj viaj taĉmentoj, kaj
la popoloj, kiuj estos kun vi; al ĉiaspecaj rabobirdoj
kaj al la bestoj de la kampo Mi transdonos vin kiel
manĝaĵon. 5 Sur la kampo vi falos; ĉar Mi tion decidis,
diras la Sinjoro, la Eternulo. 6 Kaj Mi sendos fajron
sur Magogon kaj sur la eksterdanĝerajn loĝantojn
de la insuloj; kaj oni ekscios, ke Mi estas la Eternulo.
7 Kaj Mian sanktan nomon Mi konatigos meze de
Mia popolo Izrael, kaj Mi ne plu permesos malhonori
Mian sanktan nomon; kaj la popoloj ekscios, ke Mi
estas la Eternulo, la Sanktulo en Izrael. 8 Jen tio
venos kaj plenumiĝos, diras la Sinjoro, la Eternulo;
tio estos la tempo, pri kiu Mi parolis. 9 Kaj eliros la
loĝantoj de la urboj de Izrael, faros fajron, kaj bruligos
la armilojn, la ŝildojn kaj kirasojn, la pafarkojn kaj
sagojn, la ponardojn kaj lancojn; kaj ili bruligados per
tio fajron en la daŭro de sep jaroj. 10 Ili ne alportados
lignon de la kampo, ne hakados el la arbaroj, sed
per la armiloj ili farados fajron; ili prirabos siajn
rabintojn, kaj prenos kaptaĵon de tiuj, kiuj prenis
kaptaĵon de ili, diras la Sinjoro, la Eternulo. 11 En
tiu tempo Mi donos al Gog tombolokon en Izrael,
la valon, tra kiu oni iras orienten de la maro, kaj ĝi
fortimigos la pasantojn, kaj tie oni enterigos Gogon
kaj lian tutan homomulton, kaj oni nomos ĝin Valo
de la Homomulto de Gog. 12 Kaj la domo de Izrael
enterigos ilin, por purigi la landon, en la daŭro de
sep monatoj. 13 Kaj la enterigadon faros la tuta
popolo de la lando; kaj glora estos por ili tiu tempo,
kiam Mi montros Mian majeston, diras la Sinjoro,
la Eternulo. 14 Kaj ili destinos konstantajn homojn,
kiuj irados tra la lando, kaj kune kun la trairantoj
ili enterigados tiujn, kiuj restis sur la supraĵo de la
tero, por purigi ĉi tiun; post paso de sep monatoj ili
komencos la serĉadon. 15 Kaj kiam iu el la trairantoj
de la lando vidos oston de homo, li starigos ĉe ĝi
signon, ĝis la enterigantoj enterigos ĝin en la Valo
de la Homomulto de Gog. 16 Kaj eĉ la nomo de la
urbo estos Homomulto. Kaj oni purigos la landon.
17 Kaj vi, ho filo de homo, tiele diras la Sinjoro, la
Eternulo: Diru al la ĉiaspecaj birdoj kaj al ĉiuj bestoj
de la kampo: Kolektiĝu kaj venu, kunvenu de ĉirkaŭe
al la buĉado, kiun Mi faras por vi, al la granda buĉado
sur la montoj de Izrael; kaj vi manĝos karnon kaj
trinkos sangon. 18 Karnon de fortuloj vi manĝos, kaj
sangon de princoj de la tero vi trinkos, kiel de virŝafoj,
ŝafidoj, kaproj, kaj bovoj, ĉiuj bone grasigitaj. 19 Kaj
vi manĝos grasaĵon ĝissate, kaj vi trinkos sangon
ĝisebrie de Mia buĉofero, kiun Mi buĉis por vi. 20 Kaj
ĉe Mia tablo vi satiĝos de ĉevaloj kaj rajdantoj, de
fortuloj kaj ĉiaspecaj militistoj, diras la Sinjoro, la
Eternulo. 21 Kaj Mi montros Mian majeston inter la
nacioj, kaj ĉiuj nacioj vidos Mian juĝon, kiun Mi faris,
kaj Mian manon, kiun Mi metis sur ilin. 22 Kaj la domo
de Izrael ekscios, ke Mi estas la Eternulo, ilia Dio, de

tiu tempo kaj plue. 23 Kaj la nacioj ekscios, ke la domo
de Izrael estis forkondukita en kaptitecon pro siaj
malbonagoj; pro tio, ke ili perfidis Min, Mi kaŝis Mian
vizaĝon antaŭ ili kaj transdonis ilin en la manojn de
iliaj malamikoj, kaj ili ĉiuj falis de glavo. 24 Konforme
al ilia malpureco kaj al iliaj krimoj Mi agis kun ili, kaj
Mi kaŝis antaŭ ili Mian vizaĝon. 25 Tial tiele diras la
Sinjoro, la Eternulo: Nun Mi revenigos la forkaptitojn
de Jakob, Mi kompatos la tutan domon de Izrael, kaj
Mi fervoros pri Mia sankta nomo. 26 Kaj ili konscios
sian malhonoron, kaj ĉiujn siajn perfidojn, kiujn ili
faris kontraŭ Mi, kiam ili sidos sendanĝere sur sia
tero kaj neniu ilin timigos; 27 kiam Mi revenigos ilin
el inter la popoloj kaj kolektos ilin el la landoj de iliaj
malamikoj kaj montros sur ili Mian sanktecon antaŭ
la okuloj de la multaj popoloj. 28 Kaj ili ekscios, ke
Mi, la Eternulo, estas ilia Dio, kiam, dispelinte ilin
inter la naciojn, Mi rekolektos ilin en ilian landon kaj
neniun plu restigos tie. 29 Kaj Mi ne plu kaŝos Mian
vizaĝon antaŭ ili, kiam Mi elverŝos Mian spiriton sur
la domon de Izrael, diras la Sinjoro, la Eternulo.

**40** En la dudek-kvina jaro de nia forkaptiteco, en la
komenco de la jaro, en la deka tago de la monato,
en la dek-kvara jaro post la disbato de la urbo, ĝuste
en tiu tago aperis super mi la mano de la Eternulo
kaj venigis min tien. 2 En Dia vizio Li venigis min
en la landon de Izrael, kaj starigis min sur tre alta
monto, sur kiu sude estis kvazaŭ konstruaĵoj de urbo.
3 Kaj Li venigis min tien, kaj jen mi ekvidis viron, kies
aspekto estis kiel aspekto de kupro; en la mano li
havis fadenan ŝnureton kaj mezurstangon, kaj li staris
ĉe pordego. 4 Kaj tiu viro ekparolis al mi: Ho filo de
homo, rigardu per viaj okuloj, aŭskultu per viaj oreloj,
kaj atentu per via koro ĉion, kion mi montros al vi;
ĉar vi estas venigita ĉi tien, por ke mi tion montru al
vi. Ĉion, kion vi vidos, raportu al la domo de Izrael. 5
Kaj jen mi ekvidis muron ekster la domo ĉirkaŭe, kaj
en la mano de la viro estis mezurstango, havanta la
longon de ses ulnoj kun aldono po manlarĝo por ĉiu
ulno; kaj li mezuris sur tiu konstruaĵo unu stangon
laŭlarĝe kaj unu stangon laŭalte. 6 Kaj li aliris al la
pordego, kiu estis turnita orienten, kaj supreniris
sur ĝia ŝtuparo; kaj li mezuris sur unu sojlo de la
pordego la larĝon de unu stango kaj sur la dua sojlo la
larĝon de unu stango. 7 Kaj en la flankaj ĉambretoj li
mezuris unu stangon da longo kaj unu stangon da
larĝo, kaj inter la ĉambretoj kvin ulnojn; kaj sur la
sojlo de la pordego apud la portiko, kondukanta al
la interna pordego, ankaŭ unu stangon. 8 Kaj en la
portiko de la interna pordego li mezuris unu stangon.
9 En la portiko de la pordego li mezuris ok ulnojn kaj
sur ĝiaj kolonoj du ulnojn; la portiko de la pordego
estis interne de la konstruaĵo. 10 Da flankaj ĉambretoj
ĉe la orienta pordego estis tri sur unu flanko kaj tri
sur la alia flanko; ĉiuj tri havis unu mezuron, kaj
ankaŭ la ambaŭflankaj kolonoj havis unu mezuron.
11 Li mezuris la larĝon de la enirejo de la pordego,
dek ulnojn; laŭlonge de la pordego li mezuris dek tri
ulnojn. 12 La spaco antaŭ la ĉambretoj estis po unu
ulno sur ambaŭ flankoj, kaj la ĉambretoj havis po ses
ulnoj sur ambaŭ flankoj. 13 Kaj li mezuris la pordegon
de la tegmento de unu ĉambreto ĝis la tegmento de la
dua ĉambreto, dudek kvin ulnojn laŭlarĝe; unu pordo
estis kontraŭ la alia pordo. 14 Kaj en la kolonoj li
kalkulis sesdek ulnojn, en la kolonoj de la korto kaj de
la pordego ĉirkaŭe. 15 Kaj de la antaŭo de la pordego
de la eniro ĝis la antaŭo de la interna portiko de la
pordego estis kvindek ulnoj. 16 Kaj kovritaj fenestroj
estis en la flankaj ĉambretoj kaj en la vestibloj kun
direkto internen, ĉirkaŭe de la pordego; tiel ankaŭ en
la vestibloj la fenestroj estis direktitaj ĉe ĉiuj flankoj
internen, kaj sur la kolonoj estis pentritaj palmoj.
17 Kaj li venigis min sur la korton eksteran; kaj tie
mi ekvidis ĉambrojn kaj pavimon, faritan ĉirkaŭe ĉe
la korto; tridek ĉambroj estis sur la pavimo. 18 La
pavimo estis flanke de la pordegoj; laŭlonge de la
pordegoj la pavimo estis pli malalte. 19 Kaj li mezuris
la larĝon deloke de la malsupra pordego ĝis la ekstera
rando de la interna korto, cent ulnojn orienten kaj
norden. 20 Li mezuris ankaŭ la longon kaj la larĝon de
la norden turnita pordego de la ekstera korto. 21 Kaj
da flankaj ĉambretoj estis ambaŭflanke po tri; kaj ĝiaj
kolonoj kaj portikoj havis la saman mezuron, kiel ĉe
la unua pordego: kvindek ulnojn da longo kaj dudek
kvin ulnojn da larĝo. 22 Ĝiaj fenestroj kaj vestibloj kaj
palmornamoj havis la saman mezuron, kiel la pordego
turnita orienten; per sep ŝtupoj oni leviĝadis sur ĝin;
kaj antaŭ ĝi estis ĝia vestiblo. 23 Kaj la pordegoj de
la interna korto estis kontraŭ la pordegoj norda kaj
orienta; kaj li mezuris de pordego ĝis pordego cent
ulnojn. 24 Kaj li kondukis min suden; kaj jen estis
pordego turnita suden; kaj li mezuris ĝiajn kolonojn
kaj vestiblojn, kaj ilia mezuro estis la sama, kiel ĉe

la aliaj. 25 Kaj fenestrojn kaj vestiblojn ĉirkaŭe ĝi
havis tiajn samajn, kiel tiuj fenestroj; la longo de la
pordego estis kvindek ulnoj, kaj la larĝo dudek kvin
ulnoj. 26 Kaj por supreniri ĝi havis sep ŝtupojn, kaj
iliaj vestibloj estis antaŭ ili, kaj palmornamojn ĝiaj
kolonoj havis po unu sur unu flanko kaj unu sur la
alia flanko. 27 Ankaŭ ĉe la interna korto estis pordego
turnita suden; kaj li mezuris de unu pordego al la alia,
turnita suden, cent ulnojn. 28 Kaj li venigis min sur la
internan korton tra la suda pordego; kaj li mezuris
ĉe la suda pordego la saman mezuron. 29 Kaj ĝiaj
ĉambretoj kaj kolonoj kaj portikoj havis la saman
mezuron, kiel tiuj; kaj fenestrojn ĝi kaj ĝiaj portikoj
havis ĉirkaŭe; ĉio havis la longon de kvindek ulnoj kaj
la larĝon de dudek kvin ulnoj. 30 Kaj la portikoj ĉirkaŭe
havis la longon de dudek kvin ulnoj kaj la larĝon de
kvin ulnoj. 31 Estis ankaŭ portiko al la ekstera korto,
kaj palmornamoj sur la kolonoj, kaj ok ŝtupoj por
leviĝo. 32 Kaj li venigis min sur la internan korton
al la orienta flanko; kaj li mezuris ĉe la pordego la
samajn mezurojn, kiel ĉe la aliaj. 33 Kaj ĝiaj ĉambretoj
kaj kolonoj kaj portikoj havis la samajn mezurojn; kaj
fenestrojn ĝi kaj ĝiaj portikoj havis ĉirkaŭe; ĉio havis
la longon de kvindek ulnoj kaj la larĝon de dudek
kvin ulnoj. 34 Estis ankaŭ portiko al la ekstera korto,
kaj palmornamoj sur la kolonoj ambaŭflanke, kaj ok
ŝtupoj por leviĝo. 35 Kaj li venigis min al la norda
pordego; kaj li mezuris tie tiajn samajn mezurojn.
36 Ĝi havis ĉambretojn, kolonojn, kaj portikojn, kaj
fenestrojn ĉirkaŭe; ĉio havis la longon de kvindek
ulnoj kaj la larĝon de dudek kvin ulnoj. 37 Kaj ĝiaj
kolonoj staris en la direkto al la ekstera korto, kaj
palmornamoj estis sur la kolonoj ambaŭflanke, kaj
ok ŝtupoj por leviĝo. 38 Estis ankaŭ ĉambro kun sia
enirejo apud la kolonoj ĉe la pordegoj; tie oni lavadis
la bruloferon. 39 En la portiko de la pordego staris
du tabloj sur unu flanko kaj du tabloj sur la dua
flanko, por buĉi sur ili la bruloferon, pekoferon, kaj
kulpoferon. 40 Ĉe la ekstera flanko apud la enirejo de
la norda pordego staris du tabloj, kaj ĉe la dua flanko,
apud la portiko de la pordego, staris ankaŭ du tabloj.
41 Kvar tabloj unuflanke kaj kvar tabloj aliaflanke
staris ĉe la flankoj de la pordego: ok tabloj, sur kiuj
oni buĉadis. 42 Kaj kvar tabloj por bruloferoj estis
el ĉirkaŭhakitaj ŝtonoj, kaj havis la longon de unu
ulno kaj duono kaj la larĝon de unu ulno kaj duono
kaj la alton de unu ulno; sur ili oni kuŝigadis la ilojn,
per kiuj oni buĉadis la bruloferon kaj aliajn oferojn.
43 Kaj listeloj, havantaj la larĝon de unu manplato,
estis ĉe la muroj de la domo ĉirkaŭe; kaj sur la tablojn
oni metadis la viandon de la ofero. 44 Ekstere de la
interna pordego estis ĉambroj por kantistoj, ĉe la
interna korto, flanke de la norda pordego; ili estis
turnitaj per sia vizaĝa flanko suden, sed unu, flanke
de la orienta ĉambro, estis turnita norden. 45 Kaj li
diris al mi: Ĉi tiu ĉambro, kiu estas turnita suden,
estas por la pastroj, kiuj plenumas la servadon en la
domo; 46 kaj la ĉambro, kiu estas turnita per sia vizaĝa
flanko norden, estas por la pastroj, kiuj plenumas
la servadon ĉe la altaro: tio estas la filoj de Cadok,
kiuj solaj el la idoj de Levi povas alproksimiĝi al la
Eternulo, por servi al Li. 47 Kaj li mezuris la korton: ĝi
havis la longon de cent ulnoj kaj la larĝon de cent
ulnoj, ĝi estis kvadrata; kaj la altaro staris antaŭ la
domo. 48 Kaj li venigis min en la vestiblon de la domo;
kaj li mezuris ĉe kolono de la portiko kvin ulnojn ĉe
unu flanko kaj kvin ulnojn ĉe la dua flanko; kaj la
larĝo de la pordego estis tri ulnoj ĉe unu flanko kaj tri
ulnoj ĉe la dua flanko. 49 La longo de la portiko estis
dudek ulnoj, kaj la larĝo dek unu ulnoj, kaj ĝi havis
ŝtupojn por supreniri; kaj la kolonoj havis bazaĵojn,
unu ĉe unu flanko kaj unu ĉe la alia flanko.

41 Kaj li venigis min en la templon; kaj li mezuris
ĉe la kolonoj ses ulnojn da larĝo ĉe unu flanko
kaj ses ulnojn da larĝo ĉe la alia flanko, laŭlarĝe de la
tabernaklo. 2 La larĝo de la pordo estis dek ulnoj, kaj
la flankoj de la pordo havis la larĝon de kvin ulnoj
ĉe unu flanko kaj kvin ulnoj ĉe la alia flanko; kaj li
mezuris la longon de la templo, kvardek ulnojn, kaj
la larĝon, dudek ulnojn. 3 Kaj li eniris internen, kaj
mezuris sur la kolono de la pordo du ulnojn kaj sur
la pordo mem ses ulnojn; kaj la larĝo de la pordo
estis sep ulnoj. 4 Kaj li mezuris en la longo de la
templo dudek ulnojn kaj en la larĝo dudek ulnojn en
la interna parto de la templo; kaj li diris al mi: Ĉi tio
estas la plejsanktejo. 5 Kaj li mezuris la muron de la
domo, kiu havis ses ulnojn da diko, kaj la larĝo de
la flanka galerio ĉirkaŭe de la tuta domo estis kvar
ulnoj. 6 Kaj la flankaj galerioj, unu apud la alia, havis
la longon de tridek tri futoj, kaj limiĝis per la muro,
kiu estis ĉe la domo por la galerioj ĉirkaŭe, por ke ili
estu kunigitaj inter si, sed ne kunigitaj kun la muro
de la domo. 7 Kaj la larĝo kaj amplekso de la flankaj

galerioj estis des pli grandaj ju pli alte; ĉar ankaŭ la
domo estis ju pli alte des pli ampleksa ĉiuflanke, kaj
supre la domo estis pli larĝa; kaj el la malsupra galerio
oni povis iri en la supran tra la meza. 8 Kaj mi vidis ĉe
la domo ĉirkaŭe altaĵon, kiu estis la fundamento por
la galerioj kaj havis la larĝon de tuta stango de ses
ulnoj. 9 La larĝo de la muro de la galerio ekstere estis
kvin ulnoj, kaj libera loko kondukis al la galerioj de la
domo. 10 Kaj la interspaco inter la oficaj ĉambroj, kiuj
estis ĉiuflanke ĉirkaŭ la domo, estis dudek ulnoj. 11 Kaj
estis pordoj el la galerioj al la libera loko, unu pordo
turnita norden kaj unu pordo suden; la larĝo de la
libera loko estis kvin ulnoj ĉirkaŭe. 12 La konstruaĵo,
kiu estis turnita al la placo okcidenten, havis la larĝon
de sepdek ulnoj; kaj la muro de la konstruaĵo havis
la larĝon de kvin ulnoj ĉiuflanke, kaj ĝia longo estis
naŭdek ulnoj. 13 Kaj li mezuris la longon de la domo,
cent ulnojn; kaj la placo kaj la konstruaĵo kaj ĝiaj
muroj havis ankaŭ la longon de cent ulnoj. 14 Kaj
la larĝo de la antaŭa flanko de la domo kaj la placo
orienta havis ankaŭ cent ulnojn. 15 Kaj li mezuris la
longon de la konstruaĵo kontraŭ la placo, kiu estis
malantaŭe, kun ĝiaj flankaj partoj ambaŭflanke, cent
ulnojn; ankaŭ la internan templon kaj la portikojn de
la korto. 16 La sojloj kaj la kovritaj fenestroj kaj la
galerioj ĉirkaŭe en siaj tri etaĝoj kontraŭ ĉiu sojlo
estis tabulkovritaj per ligno ĉiuflanke, ankaŭ la tero
ĝis la fenestroj; kaj la fenestroj estis kovritaj. 17 De la
supra parto de la pordo ĝis la internaj kaj eksteraj
partoj de la domo laŭ la tuta muro ĉirkaŭe, interne
kaj ekstere ĉio estis laŭmezura. 18 Kaj estis faritaj
keruboj kaj palmornamoj; inter unu kerubo kaj la alia
estis palmornamo, kaj ĉiu kerubo havis du vizaĝojn.
19 Kaj homa vizaĝo estis turnita al la palmornamo de
unu flanko, kaj al la palmornamo de la dua flanko
estis turnita vizaĝo leonida; tiel estis farite en la
tuta domo ĉirkaŭe. 20 De la tero ĝis la supro de la
pordo estis skulptitaj la keruboj kaj la palmornamoj,
ankaŭ sur la muro de la templo. 21 La templo havis
kvarangulajn fostojn, kaj la tuta aspekto de la sanktejo
estis simetria. 22 La ligna altaro havis la alton de tri
ulnoj kaj la longon de du ulnoj; ĝiaj anguloj kaj ĉiuj
ĝiaj flankoj estis el ligno. Kaj li diris al mi: Ĉi tio estas
la tablo, kiu staras antaŭ la Eternulo. 23 Kaj du pordoj
estis en la templo kaj en la sanktejo. 24 Ĉiu pordo
havis du fermoplatojn, kiuj ambaŭ estis moveblaj; du
fermoplatojn havis unu pordo, kaj du fermoplatojn
havis la dua. 25 Kaj sur ili, sur la pordoj de la templo,
troviĝis keruboj kaj palmornamoj similaj al tiuj, kiuj
estis sur la muroj; kaj antaŭ la portiko ekstere estis
ligna podio. 26 Kaj kovritaj fenestroj kaj palmornamoj
estis ĉe ambaŭ flankoj de la portiko kaj flankpartoj de
la domo kaj podioj.

42 Kaj li elkondukis min sur la korton eksteran, kiu
estis en norda direkto; kaj li venigis min al la
ofica ĉambro, kiu estis kontraŭ la placo kaj kontraŭ la
konstruaĵo norde. 2 Ĝia longo ĝis la norda pordo estis
cent ulnoj, kaj la larĝo kvindek ulnoj. 3 Kontraŭ la
dudek ulnoj de la interna korto kaj kontraŭ la pavimo
de la ekstera korto estis galerio apud galerio trietaĝe.
4 Kaj antaŭ la oficaj ĉambroj estis pasejo, havanta
la larĝon de dek ulnoj kaj internen unu ulnon; iliaj
pordoj malfermiĝadis norden. 5 La supraj ĉambroj
estis malpli ampleksaj, ĉar la galerioj iom deprenis
de ili kompare kun la malsupraj kaj mezaj partoj
de la konstruaĵo. 6 Ĉar ili estis trietaĝaj kaj ili ne
havis kolonojn kiel la kolonoj de la kortoj, tial ili
estis malgrandigitaj kompare kun la malsupraj kaj
mezaj, komencante de la tero. 7 Kaj la muro ekster la
oficaj ĉambroj, en la direkto al la ekstera korto, havis
antaŭ la ĉambroj la longon de kvindek ulnoj. 8 Ĉar
la longo de la ĉambroj, turnitaj al la ekstera korto,
estis kvindek ulnoj, tial la spaco antaŭ la templo estis
cent ulnoj. 9 Kaj malsupre por tiuj ĉambroj estis
enirejo de oriente, por ke oni povu veni al ili el la
ekstera korto. 10 Laŭlarĝe de la muro de la korto
en la direkto al oriento, antaŭ la placo kaj antaŭ la
konstruaĵo estis ĉambroj. 11 Kaj pasejo antaŭ ili estis
tia sama, kiel antaŭ la ĉambroj, kiuj estis norde, kaj
tiaj samaj estis ilia longo kaj larĝo, ĉiuj iliaj eliroj kaj
ilia aranĝo kaj iliaj pordoj. 12 Kaj simile al la pordoj
de la ĉambroj turnitaj suden ankaŭ ĉe la orientaj
ĉambroj estis enira pordo ĉe la komenco de la vojo,
de tiu vojo, kiu iris laŭlonge de la muro. 13 Kaj li
diris al mi: La ĉambroj nordaj kaj la ĉambroj sudaj,
kiuj estas antaŭ la placo, estas ĉambroj sanktaj, en
kiuj la pastroj, starantaj proksime al la Eternulo,
konsumas la plej sanktajn oferojn; tie ili kuŝigas la
plej sanktajn oferojn kaj la farunoferon kaj pekoferon
kaj kulpoferon, ĉar la loko estas sankta. 14 Kiam la
pastroj eniris ĉi tien, ili devas ne eliri el la sanktejo
sur la eksteran korton, antaŭ ol ili restigis ĉi tie siajn
vestojn, en kiuj ili faris la servadon, ĉar tiuj vestoj

estas sanktaj; ili metu sur sin aliajn vestojn, kaj tiam
ili povas iri al lokoj de la popolo. 15 Kiam li finis la
mezuradon de la interna domo, li elkondukis min tra
la pordego, kiu estis turnita orienten, kaj mezuris
la domon ĉe ĉiuj flankoj. 16 Li mezuris la orientan
flankon per la mezura stango, kvincent mezurajn
stangojn ĉirkaŭe. 17 Li mezuris la nordan flankon,
ankaŭ kvincent mezurajn stangojn ĉirkaŭe. 18 La
sudan flankon li mezuris, ankaŭ kvincent mezurajn
stangojn. 19 Li turnis sin al la okcidenta flanko, kaj
tie ankaŭ mezuris kvincent mezurajn stangojn. 20 De
kvar flankoj li mezuris; la muro ĉirkaŭe havis kvincent
stangojn da longo kaj kvincent stangojn da larĝo, por
apartigi la sanktaĵon de la nesanktaĵo.

**43** Kaj li venigis min al la pordego, al tiu pordego,
kiu estas turnita orienten. 2 Kaj jen la majesto de
la Dio de Izrael estis venanta laŭ la orienta vojo; kaj
Lia voĉo estis kiel la bruo de granda akvo; kaj la tero
lumiĝis de Lia majesto. 3 Tio estis vizio simila al tiu
vizio, kiun mi vidis antaŭe, kiam mi iris, por antaŭdiri
pereon al la urbo, kaj vizio simila al tiu, kiun mi vidis
ĉe la rivero Kebar. Kaj mi ĵetis min vizaĝaltere. 4 Kaj
la majesto de la Eternulo eniris en la domon tra la
pordego, kiu estis turnita orienten. 5 Kaj levis min la
spirito, kaj venigis min sur la internan korton; kaj
jen la majesto de la Eternulo plenigis la domon. 6
Kaj mi aŭdis, ke Iu parolas al mi el la domo, kaj viro
staris apud mi. 7 Kaj estis dirite al mi: Ho filo de
homo! jen estas la loko de Mia trono, kaj la loko de la
plandoj de Miaj piedoj, kie Mi loĝos eterne inter la
Izraelidoj; kaj la domo de Izrael ne plu malpurigos
Mian sanktan nomon, nek ili nek iliaj reĝoj, per sia
malĉastado kaj per la kadavraĵoj de siaj reĝoj sur iliaj
altaĵoj. 8 Ili starigis sian sojlon apud Mia sojlo kaj
siajn fostojn apud Miaj fostoj, tie ke nur muro estis
inter Mi kaj ili; kaj ili malpurigis Mian sanktan nomon
per siaj abomenindaĵoj, kiujn ili faris; tial Mi pereigis
ilin en Mia kolero. 9 Sed nun ili forigos de Mi sian
malĉastaĵon kaj la kadavraĵojn de siaj reĝoj, kaj Mi
loĝos inter ili eterne. 10 Vi, ho filo de homo, montru
al la domo de Izrael ĉi tiun domon, por ke ili ekhontu
pri siaj malbonagoj kaj alkonformigu sin al ĝia aranĝo.
11 Kaj se ili ekhontos pri ĉio, kion ili faris, tiam montru
al ili la bildon de la domo, ĝian aranĝon, ĝiajn elirojn
kaj enirojn, ĉiujn ĝiajn manierojn kaj leĝojn, ĉiujn
ĝiajn morojn kaj instrukciojn, kaj priskribu ĉion antaŭ
iliaj okuloj, por ke ili observu ĉiujn ĝiajn instrukciojn
kaj leĝojn kaj plenumu ilin. 12 Jen estas la leĝo por la
domo: la tuta spaco sur la supro de la monto ĉirkaŭe
estas plejsanktejo; tio estas la leĝo por la domo. 13
Kaj jen estas la mezuroj de la altaro laŭ ulnoj, kun
aldono po manlarĝo por ĉiu ulno: la bazo havu unu
ulnon kaj la larĝo unu ulnon, kaj la listelo ĉe ĝia
rando ĉirkaŭe havu la larĝon de unu manstreĉo; kaj
tia estu la dorso de la altaro. 14 Kaj de la bazo sur la
tero ĝis la malsupra elstaraĵo devas esti du ulnoj, kaj
la larĝo estu unu ulno; kaj de la malgranda elstaraĵo
ĝis la granda elstaraĵo estu kvar ulnoj, kaj la larĝo
unu ulno. 15 Kaj la altaro mem havu kvar ulnojn, kaj
de la altaro leviĝu supren kvar kornoj. 16 Kaj la altaro
havu dek du ulnojn da longo kaj dek du ulnojn da
larĝo, ĝi estu kvadrata sur ĉiuj siaj kvar flankoj. 17 Kaj
la elstaraĵo havu dek kvar ulnojn da longo kaj dek
kvar ulnojn da larĝo sur ĉiuj siaj kvar flankoj, kaj la
listelo ĉirkaŭ ĝi havu duonon de ulno, kaj ĝia bazo
ĉirkaŭe havu unu ulnon; kaj ĝiaj ŝtupoj devas esti
ĉe la orienta flanko. 18 Kaj Li diris al mi: Ho filo de
homo! tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Tio estas la
leĝoj por la altaro por tiu tago, kiam oni konstruos
ĝin, por alportadi sur ĝi bruloferojn kaj aspergadi ĝin
per sango. 19 Kaj al la pastroj Levidoj el la idaro de
Cadok, kiuj alproksimiĝos al Mi, por servi al Mi, diras
la Sinjoro, la Eternulo, donu bovidon kiel pekoferon.
20 Kaj prenu iom el ĝia sango, kaj ŝprucigu sur ĝiajn
kvar kornojn kaj sur la kvar angulojn de la elstaraĵo
kaj sur la listelon ĉirkaŭe; kaj per tio vi ĝin purigos
kaj pekliberigos. 21 Poste prenu la pekoferan bovidon,
kaj forbruligu ĝin sur aparta loko de la domo ekster la
sanktejo. 22 Kaj en la sekvanta tago alportu virkapron
sendifektan kiel pekoferon; kaj oni pekliberigu la
altaron tiel same, kiel oni pekliberigis per la bovido.
23 Kiam vi finos la pekliberigon, alportu bovidon
sendifektan, kaj sendifektan virŝafon el la ŝafoj; 24
kaj alportu ilin antaŭ la Eternulon, kaj la pastroj ĵetu
sur ilin salon kaj faru el ili bruloferon al la Eternulo.
25 Dum sep tagoj alportu ĉiutage pekoferan kapron;
kaj ili alportu po unu bovido el la bovoj kaj po unu
virŝafo el la ŝafoj, sendifektajn. 26 Dum sep tagoj oni
pekliberigu la altaron kaj purigu ĝin kaj konsekru
ĝin. 27 Kiam finiĝos tiuj tagoj, komencante de la oka
tago kaj plue, la pastroj farados sur la altaro viajn
bruloferojn kaj viajn pacoferojn; kaj Mi estos favora al
vi, diras la Sinjoro, la Eternulo.

**44** Kaj li venigis min denove al la ekstera pordego
de la sanktejo, al tiu, kiu estis turnita orienten;
sed ĝi estis ŝlosita. 2 Kaj la Eternulo diris al mi: Ĉi tiu
pordego estos ŝlosita, kaj oni ĝin ne malfermu, kaj
neniu iru tra ĝi; ĉar la Eternulo, Dio de Izrael, eniris
tra ĝi, tial ĝi restu ŝlosita. 3 Nur la princo, la princo
povas sidi en ĝi, por manĝi panon antaŭ la Eternulo;
tra la portiko de la pordego li eniru, kaj laŭ la sama
vojo li eliru. 4 Kaj li venigis min al la domo tra la
norda pordego; kaj mi ekvidis, ke jen la majesto de la
Eternulo plenigis la domon de la Eternulo; kaj mi ĵetis
min vizaĝaltere. 5 Kaj la Eternulo diris al mi: Ho filo
de homo, atentu per via koro, rigardu per viaj okuloj,
kaj aŭskultu per viaj oreloj ĉion, kion Mi diras al vi pri
ĉiuj leĝoj de la domo de la Eternulo kaj pri ĉiuj ĝiaj
instrukcioj; kaj atentu la eniron en la domon kaj ĉiujn
elirojn el la sanktejo. 6 Kaj diru al la malobeema domo
de Izrael: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Sufiĉaj
estu por vi ĉiuj viaj abomenindaĵoj, ho domo de Izrael.
7 Vi venigis aligentulojn kun necirkumcidita koro kaj
necirkumcidita karno, ke ili estu en Mia sanktejo, por
malsanktigi Mian domon; vi alportadis Mian panon,
grasaĵon, kaj sangon, kaj rompadis Mian interligon per
ĉiuj viaj abomenindaĵoj. 8 Vi ne plenumadis mem Mian
sanktan servadon, sed vi faris ilin plenumantoj de Mia
servado en Mia sanktejo. 9 Tiele diras la Sinjoro, la
Eternulo: Neniu aligentulo kun necirkumcidita koro
kaj necirkumcidita karno eniru en Mian sanktejon,
eĉ el tiuj aligentuloj, kiuj loĝas inter la Izraelidoj. 10
Sed la Levidoj, kiuj malproksimiĝis de Mi, kiam la
Izraelidoj erarvagis, kaj kiuj perfidis Min, por sekvi
siajn idolojn, ili estu punataj pro siaj malbonagoj.
11 Ili estos en Mia sanktejo servistoj, havantaj sian
oficon ĉe la pordegoj de la domo, simplaj servistoj
en la domo; ili buĉados por la popolo la bruloferon
kaj buĉoferon, kaj ili staros antaŭ la homoj, por servi
ilin. 12 Pro tio, ke ili servis ilin antaŭ iliaj idoloj kaj
estis por la Izraelidoj logilo al malbonagoj, pro tio
Mi levis Mian manon sur ilin, diras la Sinjoro, la
Eternulo, kaj ili estu punataj pro siaj malbonagoj. 13
Ili ne alproksimiĝu al Mi, por fari pastran servadon
antaŭ Mi kaj por aliri al ĉiuj Miaj sanktaĵoj, al la
plejsanktejo; ili portu sur si sian malhonoron, kaj
siajn abomenindaĵojn, kiujn ili faris. 14 Mi destinis
por ili esti servistoj en la domo por ĉiuj laboroj en ĝi,
kaj por ĉio, kio estas farata en ĝi. 15 Sed la pastroj
Levidoj, filoj de Cadok, kiuj plenumadis la servadon
en Mia sanktejo en la tempo, kiam la Izraelidoj defalis
de Mi, ili alproksimiĝadu al Mi, por servi al Mi; ili
staru antaŭ Mi, por alporti al Mi grasaĵon kaj sangon,
diras la Sinjoro, la Eternulo. 16 Ili eniradu en Mian
sanktejon, ili alproksimiĝadu al Mia tablo, por servi al
Mi, kaj ili plenumadu antaŭ Mi la servan oficon. 17
Kiam ili eniros en la pordegon de la interna korto,
ili metu sur sin tolajn vestojn; kaj lanaĵo ne devas
esti sur ili, kiam ili servos en la pordego de la interna
korto kaj en la domo. 18 Tola kapornamo estu sur ilia
kapo, kaj linaj pantalonoj sur iliaj lumboj; ili ne zonu
sin en ŝvito. 19 Kaj kiam ili devos eliri sur la eksteran
korton, sur la eksteran korton al la popolo, ili demetu
de si siajn vestojn, en kiuj ili servis, kaj deponu ilin en
la sanktaj ĉambroj, kaj ili metu sur sin aliajn vestojn,
por ke ili ne sanktigu la popolon per siaj vestoj. 20
Sian kapon ili ne razu, kaj ili ankaŭ ne lasu libere
kreski siajn harojn, sed ili pritondu sian kapon. 21
Vinon trinku neniu el la pastroj, kiam ili devas iri en
la internan korton. 22 Vidvinon aŭ eksedzinon ili ne
prenu al si kiel edzinon; sed nur virgulinon el la idaro
de la domo de Izrael, aŭ vidvinon, kiu vidviniĝis de
pastro, ili prenu. 23 Mian popolon ili devas instrui
distingi inter sanktaĵo kaj nesanktaĵo, inter malpuraĵo
kaj puraĵo. 24 En disputa afero ili stariĝu por juĝi, kaj
ili juĝu laŭ Mia juro; Mian instruon kaj Miajn leĝojn
pri ĉiuj Miaj festoj ili observu, kaj Miajn sabatojn ili
tenu sankte. 25 Al homo mortinta ili ne aliru, por ne
fariĝi malpura; nur por la patro aŭ la patrino, por filo
aŭ filino, por frato aŭ needzinigita fratino ili povas
sin malpurigi. 26 Kaj kiam tia pastro repuriĝos, oni
kalkulu al li sep tagojn. 27 Kaj en la tago, kiam li venos
en la sanktejon, en la internan korton, por servi en la
sanktejo, li alportu sian pekoferon, diras la Sinjoro, la
Eternulo. 28 Kaj ilia heredaĵo estu tio, ke Mi estas ilia
heredaĵo; terposedaĵon ne donu al ili en Izrael: Mi
estas ilia posedaĵo. 29 La farunoferojn, pekoferojn,
kaj kulpoferojn ili manĝu; kaj ĉio anatemita en Izrael
apartenu al ili. 30 Kaj la unuaaĵo el ĉio unuenaskita,
kaj ĉiaj oferdonoj el ĉiuj viaj oferdonoj apartenu al
la pastroj; kaj la unuaaĵon de via pasto donu al la
pastroj, por ke beno estu super via domo. 31 Ĉian
kadavraĵon aŭ disŝiritaĵon el la birdoj aŭ el la brutoj
la pastroj ne manĝu.

**45** Kiam vi lote dividos la teron en heredaĵojn,
tiam apartigu oferdonon al la Eternulo, sanktan

terpecon, havantan la longon de dudek kvin mil
mezurstangoj kaj la larĝon de dek mil; tiu loko estu
sankta en ĉiuj siaj limoj ĉirkaŭe. 2 El ĝi devas esti por
la sanktejo kvadrato de kvincent mezuroj ĉiuflanke,
kaj kvindek ulnoj ĉirkaŭe kiel libera placo por ĝi. 3
Per tiu mezuro mezuru la longon de dudek kvin mil
kaj la larĝon de dek mil; sur tiu loko estos la sanktejo,
la plejsanktaĵo. 4 La cetera parto de la sankta tero
apartenu al la pastroj, kiuj servas en la sanktejo, kiuj
alproksimiĝas al la Eternulo, por servi al Li; ĝi estu
por ili kiel loko por domoj, kaj estu konsekrita al la
sanktejo. 5 Dudek kvin mil ulnoj da longo kaj dek
mil ulnoj da larĝo estu por la Levidoj, kiuj servas
en la domo; dudek ĉambroj estu tie ilia posedaĵo. 6
Kaj kiel posedaĵon de la urbo apartigu kvin mil da
larĝo kaj dudek kvin mil da longo kontraŭ la sankta
terpeco: ĝi apartenu al la tuta domo de Izrael. 7 Kaj al
la princo donu parton ambaŭflanke apud la sankta
terpeco kaj apud la urba posedaĵo, sur la okcidenta
flanko okcidenten kaj sur la orienta flanko orienten;
ĝia longo devas esti tia sama, kiel de unu el tiuj partoj
de la okcidenta limo ĝis la orienta. 8 Tio estos lia tero,
lia terposedaĵo en Izrael, por ke Miaj princoj ne plu
premu Mian popolon; kaj la ceteran teron oni donu
al la domo de Izrael laŭ iliaj triboj. 9 Tiele diras la
Sinjoro, la Eternulo: Sufiĉe estas por vi, ho princoj de
Izrael; forigu la perfortadon kaj rabadon, agu juste kaj
virte, ĉesigu vian persekutadon kontraŭ Mia popolo,
diras la Sinjoro, la Eternulo. 10 Ĝusta pesilo, ĝusta
ŝutmezurilo, kaj ĝusta verŝmezurilo estu ĉe vi. 11 La
efo kaj la bat'o devas havi egalan amplekson, tiel, ke
la bat'o entenu dekonon de ĥomero kaj la efo ankaŭ
dekonon de ĥomero: laŭ la ĥomero oni fiksu ilian
amplekson. 12 La siklo devas enteni dudek gerojn;
dudek sikloj, dudek vin sikloj, kaj dek kvin sikloj estu
por vi unu min'o. 13 Jen estas la oferdono, kiun vi
devas alportadi: sesono de efo el ĥomero da tritiko,
kaj sesono de efo el ĥomero da hordeo. 14 Kaj la leĝo
pri la oleo estas: bat'o da oleo; bat'o estas dekono de
kor'o; dek bat'oj faras ĥomeron, ĉar ĥomero entenas
dek bat'ojn. 15 Kaj unu ŝafidon oni donu el ducento
da ŝafoj de paŝtejo de Izrael. Tio estos farunofero,
brulofero, kaj pacofero, por pekliberigo por ili, diras
la Sinjoro, la Eternulo. 16 La tuta popolo de la lando
alportadu tian oferdonon al la princo de Izrael. 17 Kaj
la princo devas zorgi pri la bruloferoj, farunofero, kaj
verŝofero en la festoj, monatkomencoj, kaj sabatoj,
en ĉiuj festoj de la domo de Izrael; li devas alportadi
la pekoferon, la farunoferon, la bruloferon, kaj la
pacoferon, por atingi pekliberigon por la domo de
Izrael. 18 Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: En la unua
tago de la unua monato prenu sendifektan bovidon,
kaj pekliberigu la sanktejon. 19 Kaj la pastro prenu
iom el la sango de la pekofero, kaj ŝprucigu sur la
fostojn de la domo kaj sur la kvar angulojn de la
elstaraĵo de la altaro kaj sur la fostojn de la pordego
de la interna korto. 20 Tion saman faru en la sepa
tago de la monato por ĉiu, kiu pekis pro eraro aŭ
pro naiveco; kaj tiamaniere pekliberigu la domon. 21
En la dek-kvara tago de la unua monato estu ĉe vi
Pasko, festo septaga, en kiu oni devas manĝi macojn.
22 Kaj la princo en tiu tago devas alporti pro si kaj
pro la tuta popolo de la lando bovon kiel propekan
oferon. 23 Kaj dum la sep tagoj de la festo li alportadu
bruloferon al la Eternulo, po sep bovoj kaj po sep
virŝafoj sendifektaj ĉiutage dum la sep tagoj, kaj
po unu virkapro kiel pekoferon ĉiutage. 24 Kaj da
farunofero li alportos po unu efo por ĉiu bovo, kaj po
unu efo por ĉiu virŝafo, kaj po unu hino da oleo por
ĉiu efo. 25 En la dek-kvina tago de la sepa monato, en
la festo, li faru tion saman dum sep tagoj: tian saman
pekoferon, bruloferon, farunoferon, kaj oleon.

**46** Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: La pordego de
la interna korto, kiu estas turnita al oriento, estu
ŝlosita dum la ses laboraj tagoj, sed en la tago sabata
ĝi estu malfermita, kaj ankaŭ en la monatkomenco ĝi
estu malfermita. 2 Kaj la princo eniros tra la portiko
de la pordego el ekstere, kaj stariĝos ĉe la fosto de la
pordego; kaj la pastroj faros lian bruloferon kaj lian
pacoferon; kaj li adorkliniĝos sur la sojlo de la pordego
kaj eliros; sed la pordego ne estos ne estos ŝlosita
ĝis vespero. 3 La popolo de la lando adorkliniĝos
antaŭ la Eternulo ĉe la enirejo de tiu pordego en la
sabatoj kaj en la monatkomencoj. 4 La brulofero, kiun
la princo alportos al la Eternulo en sabato, estos: ses
sendifektaj ŝafidoj kaj unu sendifekta virŝafo; 5 kaj da
farunofero unu efo por la virŝafo, kaj da farunofero
por la ŝafidoj tiom, kiom povas doni lia mano, kaj
po unu hino da oleo por ĉiu efo. 6 En la tago de la
monatkomenco: sendifekta bovido kaj ses ŝafidoj kaj
sendifekta virŝafo; 7 kaj farunoferon li faru: unu efon
por la bovido, kaj unu efon por la virŝafo, kaj por la
ŝafidoj tiom, kiom povas doni lia mano, kaj po unu

hino da oleo por ĉiu efo. 8 Kiam la princo venos, li
devas eniri tra la portiko de la pordego, kaj laŭ la
sama vojo li devas eliri. 9 Kaj kiam la popolo de la
lando venos antaŭ la Eternulon en la festoj, tiam tiuj,
kiuj eniris tra la norda pordego, por adorkliniĝi, devas
eliri tra la suda pordego, kaj tiuj, kiuj eniris tra la suda
pordego, devas eliri tra la norda pordego; oni devas ne
iri returne tra tiu pordego, tra kiu oni eniris, sed oni
devas eliri tra la kontraŭa. 10 Kaj la princo estos inter
ili: kiam ili eniros, li ankaŭ eniros, kaj kiam ili eliros,
li ankaŭ eliros. 11 En la festoj kaj en la solenaj tagoj la
farunofero devas esti unu efo por la bovido, kaj unu
efo por la virŝafo, kaj por la ŝafidoj tiom, kiom povas
doni lia mano, kaj po unu hino da oleo por ĉiu efo.
12 Kiam la princo alportos al la Eternulo memvolan
bruloferon aŭ memvolan pacoferon, tiam oni devas
malfermi antaŭ li la pordegon, turnitan al oriento, kaj
li faros sian bruloferon aŭ sian pacoferon tiel, kiel li
faras ĝin en la tago sabata; poste li eliros, kaj post
lia eliro oni ŝlosos la pordegon. 13 Unujaran ŝafidon
sendifektan li alportu kiel bruloferon ĉiutage al la
Eternulo; ĉiumatene li alportu ĝin. 14 Kaj farunoferon
li alportu kune kun ĝi ĉiumatene: sesonon de efo, kaj
trionon de hino da oleo, por ŝprucigi sur la farunon;
tio devas esti la porĉiama leĝo pri la farunofero al
la Eternulo. 15 Tiamaniere oni alportu ĉiumatene la
ŝafidon kaj la farunoferon kaj la oleon, kiel konstantan
bruloferon. 16 Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Se
la princo donos donacon al iu el siaj filoj, ĝi fariĝu
heredaĵo por liaj filoj; tio estu ilia hereda posedaĵo. 17
Sed se li donos donacon el sia heredaĵo al unu el siaj
sklavoj, ĝi apartenu al li ĝis la jaro de libereco, kaj
poste ĝi revenu al la princo; nur la heredaĵo donacita
al liaj filoj devas resti ĉe ili. 18 La princo ne prenu
ion el la heredaĵo de la popolanoj, elpremante ilin
el ilia terposedaĵo: nur el sia terposedaĵo li povas
doni heredon al siaj filoj, por ke neniu el Mia popolo
estu elpuŝita el sia terposedaĵo. 19 Kaj li venigis min
tra la enirejo, kiu estis flanke de la pordego, al la
sanktaj ĉambroj, kiuj apartenas al la pastroj kaj kiuj
estas turnitaj norden; kaj jen mi tie vidis lokon ĉe
la rando okcidente. 20 Kaj li diris al mi: Ĉi tie estas
la loko, kie la pastroj devas kuiri la kulpoferon kaj
la pekoferon kaj kie ili devas baki la farunoferon,
ne alportante tion sur la eksteran korton, por ne
sanktigi la popolon. 21 Kaj li elkondukis min sur la
eksteran korton, kaj alkondukis min al la kvar anguloj
de la korto; kaj mi vidis, ke en ĉiu angulo de la korto
troviĝas ankoraŭ korto. 22 En la kvar anguloj de la
korto troviĝis aldonaj kortetoj, havantaj la longon
de kvardek ulnoj kaj la larĝon de tridek; la saman
mezuron havis ĉiuj kvar kortetoj. 23 Kaj mureto estis
ĉirkaŭe, ĉirkaŭ ĉiuj kvar, kaj kuirlokoj estis aranĝitaj
malsupre ĉe tiuj muretoj ĉirkaŭe. 24 Kaj li diris al mi:
Jen estas la kuirejoj, kie la servistoj de la domo devas
kuiri la oferojn de la popolo.

**47** Kaj li revenigis min al la pordo de la domo; kaj
mi ekvidis, ke jen el sub la sojlo de la domo fluas
akvo orienten, ĉar la vizaĝa flanko de la domo estis
turnita orienten; kaj la akvo fluis el sub la dekstra
flanko de la domo al la suda flanko de la altaro.
2 Kaj li elkondukis min tra la norda pordego, kaj
kondukis min laŭ ekstera vojo al la ekstera pordego,
turnita orienten; kaj jen la akvo fluas el la dekstra
flanko. 3 Kiam la viro iris orienten, li havis en sia
mano mezurŝnuron, kaj li mezuris mil ulnojn, kaj
transpasigis min trans la akvon, kiu estis alta ĝis la
maleoloj. 4 Kaj li mezuris ankoraŭ mil ulnojn, kaj
transpasigis min trans la akvon; la akvo estis alta ĝis
la genuoj. Kaj li mezuris ankoraŭ mil, kaj transpasigis
min trans la akvon, kiu estis alta ĝis la lumboj. 5 Kiam
li mezuris ankoraŭ mil, estis jam torento, kiun mi ne
povis transiri; ĉar la akvo estis tro alta, oni devis ĝin
transnaĝi, sed transiri la torenton oni ne povis. 6
Kaj li diris al mi: Ĉu vi vidis, ho filo de homo? Kaj li
kondukis min returne al la bordo de la torento. 7 Kiam
mi revenis, mi vidis, ke sur la bordo de la torento
estas jam tre multe da arboj sur ambaŭ flankoj. 8
Kaj li diris al mi: Ĉi tiu akvo, kiu eliras el la orienta
regiono, iros malsupren en la stepon, kaj venos en
la maron; kiam ĝi troviĝos en la maro, tiam saniĝos
la akvo. 9 Kaj ĉiu vivanta estaĵo, kiu rampas tie, kie
pasas la torentoj, reviviĝos, kaj estos tre multe da
fiŝoj; ĉar tien venos ĉi tiu akvo, kaj ĉio saniĝos kaj
reviviĝos, kien venos la torento. 10 Kaj staros apud ĝi
fiŝkaptistoj de En-Gedi ĝis En-Eglaim, kaj ili etendos
tie retojn; iliaj fiŝoj estos tiaspecaj, kiel la fiŝoj de la
Granda Maro, kaj tre multe. 11 Sed ĝiaj marĉoj kaj
marĉetoj ne saniĝos, ili estos destinitaj por salo. 12 Kaj
apud la torento sur ambaŭ bordoj kreskos ĉiaspecaj
manĝaĵdonantaj arboj; ne velkos iliaj folioj, kaj ne
forfiniĝos iliaj fruktoj; ĉiumonate ili donos novajn
fruktojn, ĉar la akvo por ili fluas el la sanktejo; kaj iliaj
fruktoj estos uzataj kiel manĝaĵo, kaj iliaj folioj kiel

kuracilo. 13 Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Jen estas
la limoj, laŭ kiuj vi devas dividi heredige la teron al la
dek du triboj de Izrael: al Jozef duoblan parton. 14 Kaj
dividu ĝin al ĉiuj egale; ĉar per levo de la mano Mi
promesis doni ĝin al viaj patroj, tial ĉi tiu tero fariĝos
via hereda posedaĵo. 15 Jen estas la limo de la lando:
sur la norda rando, komencante de la Granda Maro, ĝi
iras tra Ĥetlon en la direkto al Cedad; 16 tra Ĥamat,
Berota, Sibraim, kiu estas inter la limo de Damasko
kaj la limo de Ĥamat, ĝis Ĥacer-Tiĥon, kiu troviĝas
ĉe la limo de Ĥavran. 17 Kaj la limo estos de la maro
ĝis Ĥacar-Enan apud la limo de Damasko, kaj ĝis la
norda Cafon kaj la limo de Ĥamat. Tio estas la rando
norda. 18 Kaj la orientan randon mezuru inter Ĥavran
kaj Damasko, inter Gilead kaj la lando de Izrael, laŭ
Jordan, de la limo ĝis la orienta maro; tio estas la
rando orienta. 19 La suda rando estas de Tamar ĝis la
Akvo de Malpaco apud Kadeŝ, laŭ la torento ĝis la
Granda Maro; tio estas la rando suda. 20 La okcidenta
rando estas la Granda Maro, ĝis la komenco de Ĥamat;
tio estas la rando okcidenta. 21 Kaj dividu inter vi ĉi
tiun landon laŭ la triboj de Izrael. 22 Kaj dividu ĝin
lote al vi, kaj ankaŭ al la fremduloj, kiuj loĝas inter
vi kaj kiuj naskis infanojn inter vi; ili devas esti por
vi kiel indiĝenoj inter la Izraelidoj, kune kun vi ili
devas ricevi lote heredan posedaĵon inter la triboj de
Izrael. 23 En tiu tribo, inter kiu ekloĝis la fremdulo,
tie donu al li lian heredan posedaĵon, diras la Sinjoro,
la Eternulo.

48 Jen estas la nomoj de la triboj: de la norda rando
laŭ la vojo al Ĥetlon, en la direkto al Ĥamat,
Ĥacar-Enan, norde de la limo de Damasko ĝis Ĥamat;
ĉi tiu regiono de oriente ĝis okcidente apartenos sole
al Dan. 2 Kaj apud la limo de Dan, de la orienta rando
ĝis la okcidenta, havos sian parton Aŝer. 3 Apud la
limo de Aŝer, de la orienta rando ĝis la okcidenta,
havos sian parton Naftali. 4 Apud la limo de Naftali,
de la orienta rando ĝis la okcidenta, havos sian parton
Manase. 5 Apud la limo de Manase, de la orienta
rando ĝis la okcidenta, havos sian parton Efraim. 6
Apud la limo de Efraim, de la orienta rando ĝis la
okcidenta, havos sian parton Ruben. 7 Apud la limo
de Ruben, de la orienta rando ĝis la okcidenta, havos
sian parton Jehuda. 8 Apud la limo de Jehuda, de la
orienta rando ĝis la okcidenta, estos la konsekrita
terpeco, kiun vi apartigos, kaj kiu havos la larĝon de
dudek kvin mil mezurstangoj kaj la longon kiel unu el
la partoj de la orienta rando ĝis la okcidenta, kaj en
kies mezo estos la sanktejo. 9 La apartigita terpeco,
kiun vi konsekros al la Eternulo, havos la longon de
dudek kvin mil kaj la larĝon de dek mil. 10 Kaj la
sankta terpeco estos por la pastroj, havante norden
dudek kvin mil, kaj okcidenten la larĝon de dek mil,
orienten la larĝon de dek mil, kaj suden la longon
de dudek kvin mil; kaj en ĝia mezo estos la sanktejo
de la Eternulo. 11 Ĝi estu sanktigita por la pastroj
el la filoj de Cadok, kiuj plenumadis Mian servadon
kaj ne defalis de Mi dum la defalo de la Izraelidoj,
kiel defalis la Levidoj. 12 Kaj al ili estos apartigita
parto el la konsekrita terpeco, kiel plejsanktaĵo, apud
la limo de la Levidoj. 13 Kaj la Levidoj havos apud
la limo de la pastroj dudek kvin mil da longo kaj
dek mil da larĝo; la tuta longo estos dudek kvin mil,
kaj la larĝo estos dek mil. 14 Ili nenion devas vendi
el tio, nek interŝanĝi; la unuaaĵo de la lando devas
ne transiri, ĉar ĝi estas konsekrita al la Eternulo. 15
La ceteraj kvin mil da larĝo kun dudek kvin mil da
longo estas nekonsekrita apartenaĵo de la urbo, kiel
loĝatejo kaj antaŭurbo; kaj la urbo estos en la mezo.
16 Jen estas ĝiaj dimensioj: la norda rando havos kvar
mil kvincent, la suda rando kvar mil kvincent, la
orienta rando kvar mil kvincent, kaj la okcidenta
rando kvar mil kvincent. 17 La antaŭurbo de la urbo
havos norde ducent kvindek, kaj sude ducent kvindek,
kaj oriente ducent kvindek, kaj okcidente ducent
kvindek. 18 Koncerne la ceteran parton de la longo
kontraŭ la sankta terpeco, nome dek mil oriente kaj
dek mil okcidente, kiu troviĝas kontraŭ la sankta
terpeco, ĝiaj produktaĵoj devas servi kiel manĝaĵo
por la laboristoj de la urbo. 19 En la urbo laboros
laboristoj el ĉiuj triboj de Izrael. 20 La tuta apartigita
terpeco devas havi dudek kvin mil kontraŭ dudek
kvin mil; kvaronon de la sankta terpeco apartigu kiel
posedaĵon de la urbo. 21 Kio restas de la sanktigita
terpeco kaj de la posedaĵo de la urbo, de la dudek kvin
mil, apartigitaj oriente kaj okcidente, kontraŭ tiuj
partoj, tio apartenu al la princo; kaj la sankta terpeco
kaj la sankta domo estos en la mezo. 22 Kio troviĝas
inter la apartenaĵo de la Levidoj kaj la apartenaĵo de la
urbo, inter la limo de Jehuda kaj la limo de Benjamen,
tio apartenu al la princo. 23 La ceteraj triboj de la
rando orienta ĝis la rando okcidenta: Benjamen havos
unu parton. 24 Apud la limo de Benjamen, de la

orienta rando ĝis la okcidenta, havos sian parton
Simeon. 25 Apud la limo de Simeon, de la orienta
rando ĝis la okcidenta, havos sian parton Isaĥar. 26
Apud la limo de Isaĥar, de la orienta rando ĝis la
okcidenta, havos sian parton Zebulun. 27 Apud la
limo de Zebulun, de la orienta rando ĝis la okcidenta,
havos sian parton Gad. 28 Apud la limo de Gad, ĉe
la rando suda, estos la limo de Tamar ĝis la Akvo de
Malpaco apud Kadeŝ, laŭlonge de la torento ĝis la
Granda Maro. 29 Tio estas la lando, kiun vi lote dividos
kiel heredan posedaĵon al la triboj de Izrael, kaj tio
estas iliaj partoj, diras la Sinjoro, la Eternulo. 30 Kaj
jen estas la randoj de la urbo: sur la norda flanko
kvar mil kvincent mezurstangoj; 31 kaj la pordegoj
de la urbo estos nomataj laŭ la nomoj de la triboj de
Izrael; tri pordegoj norde: unu Pordego de Ruben, unu
Pordego de Jehuda, unu Pordego de Levi. 32 Ankaŭ
sur la orienta flanko kvar mil kvincent mezurstangoj;
kaj tri pordegoj: unu Pordego de Jozef, unu Pordego
de Benjamen, unu Pordego de Dan. 33 Ankaŭ sur
la suda flanko kvar mil kvincent mezurstangoj; kaj
tri pordegoj: unu Pordego de Simeon, unu Pordego
de Isaĥar, unu Pordego de Zebulun. 34 Ankaŭ sur
la okcidenta flanko kvar mil kvincent; pordegojn ĝi
havas tri: unu Pordego de Gad, unu Pordego de Aŝer,
unu Pordego de Naftali. 35 La tuta ĉirkaŭo havas dek
ok mil. Kaj la nomo de la urbo de post tiu tago estos:
Eternulo-Tie.

# Daniel

**1** En la tria jaro de la reĝado de Jehojakim, reĝo
de Judujo, venis Nebukadnecar, reĝo de Babel, al
Jerusalem, kaj eksieĝis ĝin. 2 Kaj la Sinjoro transdonis
en lian manon Jehojakimon, reĝon de Judujo, kaj
parton de la vazoj de la domo de Dio; kaj li venigis
ilin en la landon Ŝinar, en la domon de sia dio, kaj la
vazojn li metis en la trezorejon de sia dio. 3 Kaj la reĝo
diris al Aŝpenaz, la estro de liaj korteganoj, ke el la
Izraelidoj, el la reĝa idaro kaj el la nobelaro, li venigu
4 knabojn sendifektajn, belaspektajn, komprenemajn
por ĉiu saĝaĵo, klerajn, scienckomprenantajn, kaj
kapablajn servi en la palaco de la reĝo, kaj ke oni
lernigu al ili la skribadon kaj la lingvon Ĥaldean. 5 Kaj
la reĝo destinis por ili por ĉiu tago manĝaĵojn de la
reĝa tablo, kaj vinon el tiu, kiun li mem trinkadis, kaj
li ordonis eduki ilin dum tri jaroj, post kies finiĝo ili
estis komencontaj la servadon antaŭ la reĝo. 6 El la
idoj de Jehuda estis inter ili Daniel, Ĥananja, Miŝael,
kaj Azarja. 7 La estro de la korteganoj donis al ili aliajn
nomojn; kaj li donis al Daniel la nomon Beltŝacar;
al Ĥananja, Ŝadraĥ; al Miŝael, Meŝaĥ; kaj al Azarja,
Abed-Nego. 8 Daniel metis en sian koron, ke li ne
malpurigos sin per la manĝaĵoj de la reĝo, nek per la
vino, kiun ĉi tiu trinkas; tial li petis la korteganestron,
ke al li estu permesite ne malpurigi sin. 9 Dio donis al
Daniel favoron kaj simpation ĉe la korteganestro. 10
Kaj la korteganestro diris al Daniel: Mi timas mian
sinjoron, la reĝon, kiu mem destinis por vi, kion vi
devas manĝi kaj trinki; se li vidos, ke viaj vizaĝoj estas
malpli grasaj, ol ĉe aliaj knaboj, viaj samaĝuloj, tiam
vi farus mian kapon kulpa antaŭ la reĝo. 11 Tiam
Daniel diris al la inspektisto, al kiu la korteganestro
komisiis Danielon, Ĥananjan, Miŝaelon, kaj Azarjan:
12 Faru, mi petas, provon kun viaj servantoj dum dek
tagoj; oni donadu al ni por manĝi legomojn, kaj por
trinki akvon; 13 poste montriĝu al vi nia aspekto, kaj
la aspekto de la knaboj, kiuj manĝas la manĝaĵon de
la reĝo; kaj poste agu kun viaj servantoj laŭ tio, kion
vi vidos. 14 Li obeis ilin en tio kaj faris kun ili provon
dum dek tagoj. 15 Post paso de la dek tagoj montriĝis,
ke ili estas pli bonaspektaj kaj pli bonkorpaj, ol ĉiuj
knaboj, kiuj manĝis la manĝaĵon de la reĝo. 16 Tial la
inspektisto forportadis ilian manĝaĵon, kaj la vinon,
kiu estis destinita al ili por trinki, kaj donadis al
ili legomojn. 17 Kaj al tiuj kvar knaboj Dio donis
kapablojn kaj komprenemecon pri ĉiuj libroj kaj
saĝaĵo, kaj Daniel estis ankaŭ kompetenta pri ĉiaj
vizioj kaj sonĝoj. 18 Kiam pasis la tempo, kiun la reĝo
difinis por ilia venigo, la korteganestro prezentis ilin
al Nebukadnecar. 19 La reĝo parolis kun ili, kaj el ili
ĉiuj troviĝis neniu egala al Daniel, Ĥananja, Miŝael,
kaj Azarja. Kaj ili komencis servadi antaŭ la reĝo. 20
Kaj koncerne ĉiujn aferojn de saĝo kaj scio, pri kiuj
la reĝo ilin demandis, li trovis ilin dekoble pli saĝaj,
ol ĉiuj astrologoj kaj magiistoj, kiuj estis en lia tuta
regno. 21 Daniel estis tie ĝis la unua jaro de la reĝo
Ciro.

**2** En la dua jaro de la reĝado de Nebukadnecar aperis
al Nebukadnecar sonĝoj; kaj konfuziĝis lia spirito,
kaj li ne povis dormi. 2 Kaj la reĝo ordonis alvoki la
astrologojn, magiistojn, sorĉistojn, kaj Ĥaldeojn, por
ke ili diru al la reĝo liajn sonĝojn. Kaj ili venis kaj
stariĝis antaŭ la reĝo. 3 Kaj la reĝo diris al ili: Mi havis
sonĝon, kaj mia spirito maltrankviliĝis, dezirante
scii, kio estis tiu sonĝo. 4 La Ĥaldeoj respondis al la
reĝo en la lingvo Siria: Ho reĝo, vivu eterne! diru la
sonĝon al viaj servantoj, kaj ni klarigos ĝian signifon.
5 Sed la reĝo respondis kaj diris al la Ĥaldeoj: La
enhavon mi forgesis. Tamen, se vi ne diros al mi la
sonĝon kaj ĝian signifon, vi estos dishakitaj en pecojn
kaj viaj domoj estos ruinigitaj. 6 Sed se vi rakontos
al mi la sonĝon kaj ĝian signifon, vi ricevos de mi
donacojn, rekompencon, kaj grandan honoron. Tial
diru al mi la sonĝon kaj ĝian signifon. 7 Ili denove
respondis: La reĝo diru sian sonĝon al siaj servantoj,
kaj ni klarigos ĝian signifon. 8 La reĝo diris: Mi scias
bone, ke vi deziras gajni tempon, ĉar vi vidas, ke la
afero malaperis el mia memoro. 9 Se vi ne diros al mi
la sonĝon, tio montros, ke vi havas unu intencon: vi
preparas vin, por doni al mi mensogan kaj sentaŭgan
respondon, ĝis la tempo pasos. Tial rakontu al mi la
sonĝon, tiam mi konvinkiĝos, ke vi povas klarigi al
mi ankaŭ ĝian signifon. 10 La Ĥaldeoj respondis al
la reĝo kaj diris: Ne ekzistas sur la tero tia homo,
kiu povus plenumi la deziron de la reĝo; tial neniu
reĝo, kiel ajn granda kaj potenca li estus, postulis
iam similan respondon de iu astrologo, magiisto, aŭ
Ĥaldeo; 11 la afero, kiun la reĝo postulas, estas tiel
eksterordinara, ke neniu povas tion plenumi al la
reĝo, krom la dioj, kiuj ne vivas inter karnuloj. 12 Tiam
la reĝo forte indignis kaj koleris, kaj ordonis pereigi

ĉiujn saĝulojn de Babel. 13 Kiam la dekreto eliris, oni
komencis la mortigadon de la saĝuloj, kaj oni volis
mortigi ankaŭ Danielon kaj liajn kamaradojn. 14 Tiam
Daniel faris saĝan kaj prudentan rediron al Arjoĥ,
la estro de la reĝaj korpogardistoj, kiu eliris, por
mortigi la saĝulojn de Babel; 15 li demandis Arjoĥon,
la potenculon de la reĝo, dirante: Pro kio eliris de la
reĝo tia severa ordono? Tiam Arjoĥ rakontis al Daniel
la tutan aferon. 16 Daniel iris kaj petis la reĝon, ke
li donu al li templimon, kaj li prezentos al la reĝo
la klarigon. 17 Poste Daniel iris en sian domon, kaj
rakontis la aferon al siaj kamaradoj Ĥananja, Miŝael,
kaj Azarja, 18 por ke ili petegu la kompateman Dion
de la ĉielo malkaŝi tiun kaŝitan aferon, por ke Daniel
kaj liaj kamaradoj ne pereu kun la aliaj saĝuloj de
Babel. 19 Kaj tiam la kaŝitaĵo malkaŝiĝis al Daniel
en nokta vizio, kaj Daniel dankis pro tio Dion de la
ĉielo. 20 Kaj Daniel ekparolis, kaj diris: Estu benata la
nomo de Dio de eterne ĝis eterne; ĉar al Li apartenas
saĝo kaj forto; 21 Li ŝanĝas la tempojn kaj jarojn;
Li faligas reĝojn kaj starigas reĝojn; Li donas saĝon
al la saĝuloj kaj prudenton al la prudentuloj; 22 Li
malkaŝas la profundaĵon kaj kaŝitaĵon; Li scias, kio
estas en la mallumo, kaj lumo estas en Li. 23 Vin,
ho Dio de miaj patroj, mi dankas kaj gloras; ĉar Vi
donis al mi saĝon kaj forton, kaj malkaŝis al mi tion,
pri kio ni Vin petis; ĉar Vi malkaŝis al ni la aferon
de la reĝo. 24 Poste Daniel iris al Arjoĥ, al kiu la
reĝo komisiis mortigi la saĝulojn de Babel; li venis,
kaj diris al li tiel: Ne mortigu la saĝulojn de Babel,
konduku min al la reĝo, kaj mi diros al la reĝo la
klarigon. 25 Tiam Arjoĥ tuj enkondukis Danielon al
la reĝo, kaj diris al ĉi tiu tiele: Inter la transloĝigitaj
filoj de Judujo mi trovis homon, kiu povas doni al la
reĝo klarigon. 26 Tiam ekparolis la reĝo, kaj diris al
Daniel, kies nomo estis nun Beltŝacar: Ĉu vi povas
sciigi al mi la sonĝon, kiun mi vidis, kaj ĝian signifon?
27 Daniel respondis al la reĝo kaj diris: La kaŝitaĵon,
pri kiu la reĝo demandas, ne povas malkaŝi al la reĝo
la saĝuloj, nek la sorĉistoj, nek la astrologoj, nek la
divenistoj; 28 sed en la ĉielo ekzistas Dio, kiu malkaŝas
kaŝitaĵon; Li malkaŝis al la reĝo Nebukadnecar tion,
kio estos en tempo estonta. Via sonĝo kaj la vizioj de
via kapo sur via lito estis jenaj: 29 vi, ho reĝo, meditis
sur via lito pri tio, kio estos poste; kaj la Malkaŝanto
de kaŝitaĵoj montris al vi, kio estos. 30 Kaj al mi tiu
kaŝitaĵo malkaŝiĝis ne pro tio, ke mi kvazaŭ estus pli
saĝa ol ĉiuj vivantoj, sed por tio, ke la reĝo ricevu
klarigon kaj ke vi eksciu la pensojn de via koro. 31
Vi, ho reĝo, havis vizion: jen staris granda statuo;
grandega statuo tio estis; en eksterordinara brilo ĝi
staris antaŭ vi, kaj ĝia aspekto estis terura. 32 La kapo
de tiu statuo estis el pura oro; ĝiaj brusto kaj manoj
estis el arĝento, la ventro kaj femuroj el kupro; 33
ĝiaj kruroj estis el fero, ĝiaj piedoj estis parte el fero,
parte el argilo. 34 Vi vidis poste, ke ŝtono deŝiriĝis
sen ago de ia mano, frapis la statuon, ĝiajn ferajn
kaj argilajn piedojn, kaj frakasis ilin. 35 Tiam ĉio
kune frakasiĝis: la fero, argilo, kupro, arĝento, kaj
oro fariĝis kiel grenventumaĵo sur somera draŝejo,
kaj la vento ilin forportis, kaj ne restis postesigno
post ili; sed la ŝtono, kiu frakasis la statuon, fariĝis
granda monto kaj plenigis la tutan teron. 36 Tio estas
la sonĝo. Nun ni diros al la reĝo la signifon. 37 Vi,
ho reĝo, estas reĝo super reĝoj, al kiu Dio de la ĉielo
donis regnon, potencon, forton, kaj gloron; 38 kaj ĉie,
kie ajn loĝas homoj, Li transdonis en viajn manojn la
bestojn de la kampo kaj la birdojn de la ĉielo, kaj faris
vin reganto super ili ĉiuj. Vi estas la ora kapo. 39 Post
vi aperos nova regno, malpli alta ol via, kaj ankoraŭ
tria regno, kupra, kiu regos super la tuta tero. 40 La
kvara regno estos malmola, kiel fero; ĉar kiel fero
disbatas kaj frakasas ĉion, tiel ankaŭ ĝi, simile al
ĉiofrakasanta fero, disbatados kaj frakasados. 41 Kaj ke
vi vidis la piedojn kaj la fingrojn parte el potargilo kaj
parte el fero — tio estos regno de miksita konsisto, kaj
ĝi enhavos parte la malmolecon de fero, ĉar vi vidis
feron miksitan kun potargilo. 42 Sed kiel la fingroj de
la piedoj estis parte el fero, parte el argilo, tiel ankaŭ
la regno estos parte fortika, parte rompebla. 43 Kaj ke
vi vidis feron, miksitan kun potargilo, tio signifas, ke
ili estos kunigitaj per forto homa, sed ne kunfandiĝos
inter si, kiel fero ne kunfandiĝas kun argilo. 44 Sed en
la tempo de tiuj reĝoj Dio de la ĉielo starigos regnon,
kiu neniam detruiĝos, kaj ĝia reĝado ne transiros al
alia popolo; ĝi frakasos kaj detruos ĉiujn regnojn, sed
ĝi mem staros eterne. 45 Vi vidis, ke ŝtono sen ia
mano deŝiriĝis de monto, kaj frakasis feron, kupron,
argilon, arĝenton, kaj oron; la granda Dio montris al
la reĝo, kio estos poste. Tia estas precize la sonĝo kaj
ĝia ĝusta klarigo. 46 Tiam la reĝo Nebukadnecar ĵetis
sin vizaĝaltere kaj adorkliniĝis al Daniel kaj ordonis
alporti al li donacojn kaj bonodorajn incensojn. 47 La
reĝo ekparolis al Daniel, kaj diris: Vere, via Dio estas

Dio de la dioj kaj Reganto de la reĝoj, malkaŝanta
kaŝitaĵojn, kaj tial vi povis malkaŝi tiun kaŝitaĵon. 48
Tiam la reĝo altigis Danielon, donis al li grandajn kaj
riĉajn donacojn, kaj faris lin reganto super la tuta
lando de Babel kaj ĉefo super ĉiuj saĝuloj de Babel.
49 Daniel petis la reĝon, kaj ĉi tiu starigis Ŝadraĥon,
Meŝaĥon, kaj Abed-Negon super la aferoj de la lando
Babela; kaj Daniel mem restis ĉe la kortego de la reĝo.

**3** La reĝo Nebukadnecar faris oran statuon, kiu
havis la alton de sesdek ulnoj kaj la larĝon de
ses ulnoj; kaj li starigis ĝin en la valo Dura en la
lando Babela. 2 Kaj la reĝo Nebukadnecar sendis al
la satrapoj, regionestroj, militestroj, ĉefaj juĝistoj,
urbestroj, leĝistoj, oficistoj, kaj potenculoj de la
lando, ke ili venu al la solena malkovro de la statuo,
kiun starigis la reĝo Nebukadnecar. 3 Tiam kunvenis
la satrapoj, regionestroj, militestroj, ĉefaj juĝistoj,
urbestroj, leĝistoj, oficistoj, kaj potenculoj de la
lando, al la solena malkovro de la statuo, kiun la
reĝo Nebukadnecar starigis; kaj ili stariĝis antaŭ la
statuo, kiun Nebukadnecar starigis. 4 Kaj heroldo
laŭte proklamis: Estas sciigate al vi, ho popoloj, gentoj,
kaj lingvoj: 5 kiam vi aŭdos la sonon de korno, fluto,
harpo, sabeko, psaltero, sakfajfilo, kaj diversaj muzikaj
instrumentoj, tiam faligu vin kaj adorkliniĝu al la ora
statuo, kiun starigis la reĝo Nebukadnecar. 6 Kiu ne
faligos sin kaj ne adorkliniĝos, tiu tuj estos ĵetita en
ardantan fornon. 7 Tial, kiam ĉiuj popoloj ekaŭdis
la sonon de korno, fluto, harpo, sabeko, psaltero,
kaj diversaj muzikaj instrumentoj, ili faligis sin kaj
adorkliniĝis al la ora statuo, kiun starigis la reĝo
Nebukadnecar. 8 En tiu tempo tuj aliris kelkaj Ĥaldeoj
kaj akuzis la Judojn. 9 Ili ekparolis, kaj diris al la reĝo
Nebukadnecar: Ho reĝo, vivu eterne! 10 Vi, ho reĝo,
ordonis, ke ĉiu homo, kiu aŭdos la sonon de korno,
fluto, harpo, sabeko, psaltero, sakfajfilo, kaj diversaj
muzikaj instrumentoj, faligu sin kaj adorkliniĝu al la
ora statuo; 11 kaj kiu ne faligos sin kaj ne adorkliniĝos,
tiu estu ĵetita en ardantan fornon. 12 Ekzistas tamen
viroj Judaj, kiujn vi starigis super la aferoj de la lando
Babela, Ŝadraĥ, Meŝaĥ, kaj Abed-Nego; kaj tiuj homoj
ne obeas vian ordonon, ho reĝo, ne servas al viaj dioj,
kaj ne adorkliniĝas al la ora statuo, kiun vi starigis.
13 Tiam Nebukadnecar en kolero kaj furiozo ordonis
venigi Ŝadraĥon, Meŝaĥon, kaj Abed-Negon; kaj oni
tuj venigis tiujn virojn al la reĝo. 14 Nebukadnecar
ekparolis, kaj diris al ili: Ĉu intence vi, ho Ŝadraĥ,
Meŝaĥ, kaj Abed-Nego, ne servas al miaj dioj, kaj ne
adorkliniĝas al la ora statuo, kiun mi starigis? 15
De nun, kiam vi ekaŭdos la sonon de korno, fluto,
harpo, sabeko, psaltero, sakfajfilo, kaj diversaj muzikaj
instrumentoj, estu pretaj tuj faligi vin kaj adorkliniĝi
al la statuo, kiun mi faris; se vi ne adorkliniĝos, tiam
vi tuj estos ĵetitaj en ardantan fornon; kaj tiam kia dio
savos vin el miaj manoj? 16 Ŝadraĥ, Meŝaĥ, kaj Abed-
Nego respondis kaj diris al la reĝo: Ho Nebukadnecar,
ne estas al ni malfacile respondi al vi pri tio. 17 Ni
havas Dion, al kiu ni servas; Li povas savi nin el la
ardanta forno kaj ankaŭ savi nin el via mano, ho
reĝo. 18 Kaj se Li eĉ tion ne faros, vi tamen sciu,
ho reĝo, ke al viaj dioj ni ne servos, kaj al la ora
statuo, kiun vi starigis, ni ne adorkliniĝos. 19 Tiam
Nebukadnecar pleniĝis de furiozo, kaj la aspekto de
lia vizaĝo ŝanĝiĝis pro kolero kontraŭ Ŝadraĥ, Meŝaĥ,
kaj Abed-Nego; kaj li ordonis ardigi la fornon sepoble
pli forte, ol oni faradis ordinare. 20 Kaj al la plej fortaj
militistoj el sia militistaro li ordonis ligi Ŝadraĥon,
Meŝaĥon, kaj Abed-Negon, kaj ĵeti ilin en la ardantan
fornon. 21 Tiam oni ligis tiujn virojn en ilia suba kaj
supra vesto, en iliaj kapkovroj kaj aliaj vestoj, kaj oni
ĵetis ilin en la ardantan fornon. 22 Kaj ĉar la ordono de
la reĝo estis severa kaj la forno estis ardigita treege,
tial tiujn homojn, kiuj ĵetis Ŝadraĥon, Meĥaĥon, kaj
Abed-Negon, mortigis la flamo de la fajro. 23 Kaj tiuj
tri viroj, Ŝadraĥ, Meŝaĥ, kaj Abed-Nego, falis ligitaj en
la ardantan fornon. 24 Tiam la reĝo Nebukadnecar
ekmiregis, kaj en teruro li leviĝis, ekparolis, kaj diris
al siaj konsilistoj: Ĉu ne tri virojn ni ĵetis ligitajn
en la fajron? Ili respondis al la reĝo: Tiel estas, ho
reĝo. 25 Sed li parolis plue, kaj diris: Jen mi vidas kvar
virojn, ne ligitajn, kiuj iras meze de la fajro kaj estas
sendifektaj; kaj la kvara aspektas kvazaŭ filo de la dioj.
26 Kaj Nebukadnecar aliris al la aperturo de la ardanta
forno, ekparolis, kaj diris: Ho Ŝadraĥ, Meŝaĥ, kaj Abed-
Nego, servantoj de Dio la Plejalta! eliru, kaj aliru.
Tiam Ŝadraĥ, Meŝaĥ, kaj Abed-Nego eliris el meze de
la fajro. 27 Kaj la satrapoj, regionestroj, militestroj,
kaj konsilistoj de la reĝo kunvenis, kaj pririgardis
tiujn virojn, super kies korpoj la fajro havis nenian
forton, tiel, ke eĉ haro sur ilia kapo ne bruldifektiĝis,
iliaj vestoj ne ŝanĝiĝis, kaj eĉ odoron de fajro oni ne
sentis sur ili. 28 Nebukadnecar ekparolis, kaj diris:
Benata estu Dio de Ŝadraĥ, Meŝaĥ, kaj Abed-Nego, kiu

sendis Sian anĝelon, kaj savis Siajn servantojn pro tio,
ke ili fidis je Li, ne obeis la ordonon de la reĝo, kaj
oferis siajn korpojn, por ne servi kaj adorkliniĝi al
alia dio, krom sia Dio. **29** Nun mi donas ordonon: Se
iu el ia popolo, gento, aŭ lingvo eldiros blasfemon
kontraŭ Dio de Ŝadraĥ, Meŝaĥ, kaj Abed-Nego, tiu
estos hakita en pecojn kaj lia domo estos ruinigita;
ĉar ne ekzistas alia dio, kiu povus savi tiamaniere. **30**
Kaj la reĝo denove tre altigis Ŝadraĥon, Meŝaĥon, kaj
Abed-Negon en la lando Babela.

**4** La reĝo Nebukadnecar al ĉiuj popoloj, gentoj, kaj
lingvoj, kiuj estas sur la tuta tero: Kresku via
bonstato! **2** Mi trovas bona konigi la pruvosignojn
kaj miraklojn, kiujn faris sur mi Dio la Plejalta. **3**
Kiel grandaj estas Liaj pruvosignoj, kaj kiel potencaj
estas Liaj mirakloj! Lia reĝado estas eterna, kaj Lia
regado estas en ĉiuj generacioj. **4** Mi, Nebukadnecar,
estis trankvila en mia domo kaj bonfarta en mia
palaco. **5** Sed mi vidis sonĝon, kiu teruris min, kaj la
meditado sur mia lito kaj la vizioj de mia kapo min
konsternis. **6** Kaj mi donis ordonon venigi al mi ĉiujn
saĝulojn de Babel, por ke ili diru al mi la signifon de
la sonĝo. **7** Tiam venis la astrologoj, sorĉistoj, Ĥaldeoj,
kaj divenistoj; mi rakontis al ili la sonĝon, sed ili ne
povis klarigi al mi ĝian signifon. **8** Fine venis al mi
Daniel, al kiu estis donita la nomo Beltŝacar, laŭ la
nomo de mia dio, kaj kiu havas en si la spiriton de la
sanktaj dioj; mi rakontis al li la sonĝon: **9** Ho Beltŝacar,
ĉefo de la astrologoj, pri kiu mi scias, ke en vi estas
la spirito de la sanktaj dioj kaj nenia kaŝitaĵo vin
embarasas: klarigu al mi la vizion de mia sonĝo kaj
ĝian signifon. **10** La vizio de mia kapo sur mia lito estis
jena: mi vidis, ke jen meze de la tero staras arbo tre
alta; **11** tiu arbo estas bonkreska kaj forta, kaj ĝia alto
atingas la ĉielon, kaj oni ĝin vidas ĝis la randoj de la
tuta tero; **12** ĝia foliaro estas bela, kaj multe da fruktoj
estas sur ĝi, kaj sur ĝi troviĝas manĝaĵo por ĉiuj; en la
ombro sub ĝi kaŝas sin bestoj de la kampo, kaj sur ĝiaj
branĉoj sidas birdoj de la ĉielo, kaj ĉiu karno nutras
sin de ĝi. **13** Kaj mi vidis en la vizioj de mia kapo
sur mia lito, ke jen sankta prizorganto malsupreniris
de la ĉielo, **14** kaj per laŭta voĉo li diris: Dehaku ĉi
tiun arbon, ĉirkaŭhaku ĝiajn branĉojn, deprenu de ĝi
la foliaron, kaj disĵetu ĝiajn fruktojn, por ke foriĝu
la bestoj, kiuj estas sub ĝi, kaj la birdoj forflugu de
ĝiaj branĉoj. **15** Sed ĝian ĉefan radikon restigu en la
tero, en ĉenoj feraj kaj kupraj, meze de la herbo de
la kampo; ĝin trinkigu la roso de la ĉielo, kaj kune
kun la bestoj ĝi nutru sin per la herboj de la tero. **16**
La homa koro estos prenita for de ĝi, kaj ĝi ricevos
koron bestan, kaj tiel pasos super ĝi sep jaroj. **17** Per
la ordono de la prizorgantoj tio estas decidita, kaj per
la dekreto de la sanktuloj tio estas destinita, por ke la
vivantoj sciu, ke la Plejaltulo regas en la regno de la
homoj, kaj donas ĝin al tiu, al kiu Li volas, kaj starigas
super ĝi la plej humilan el la homoj. **18** Tian sonĝon
vidis mi, reĝo Nebukadnecar. Kaj vi, ho Beltŝacar, diru
ĝian signifon; ĉar neniu el la saĝuloj en mia regno
povas klarigi ĝian signifon, sed vi povas, ĉar vi havas
en vi la spiriton de la sanktaj dioj. **19** Tiam Daniel, kiu
havis la nomon Beltŝacar, en la daŭro de unu horo
staris konsternite, kaj liaj pensoj lin malĝojigis. La
reĝo ekparolis, kaj diris: Ho Beltŝacar, ne embarasu vin
la sonĝo kaj ĝia signifo. Beltŝacar respondis kaj diris:
Ho mia sinjoro, por viaj malamikoj estu tiu sonĝo, kaj
por viaj malamantoj estu ĝia signifo. **20** La arbo, kiun
vi vidis, kiu elkreskis alte kaj forte, atingis per sia
pinto la ĉielon, kaj estis videbla sur la tuta tero, **21** kaj
sur kiu estis bela foliaro, multe da fruktoj kaj manĝaĵo
por ĉiuj, sub kiu sidis bestoj de la kampo, kaj sur kies
branĉoj sidis birdoj de la ĉielo — **22** tio estas vi, ho
reĝo altiĝinta; via grandeco kreskis kaj atingis ĝis la
ĉielo, kaj via potenco ĝis la randoj de la tero. **23** Kaj ke
la reĝo vidis sanktan prizorganton, kiu malsupreniris
de la ĉielo, kaj diris: Dehaku la arbon kaj ekstermu
ĝin, sed nur ĝian ĉefan radikon restigu en la tero, en
ĉenoj feraj kaj kupraj, meze de la herbo de la kampo,
ĝin trinkigu la roso de la ĉielo, kaj ĝi havu la sorton
de la bestoj de la kampo, ĝis pasos super ĝi sep jaroj —
**24** jen estas la signifo de tio, ho reĝo: tio estas dekreto
de la Plejaltulo, kiu trafos mian sinjoron, la reĝon. **25**
Vi estos elpuŝita el meze de la homoj, kaj vi vivos
kun la bestoj de la kampo; per herbo oni vin nutros,
kiel bovojn; roson de la ĉielo oni trinkigos al vi; kaj
sep jaroj pasos super vi, ĝis vi ekscios, ke super la
regno de homoj regas la Plejaltulo, kaj donas ĝin al
tiu, al kiu Li volas. **26** Kaj ke estas ordonite restigi la
ĉefan radikon de la arbo — tio signifas, ke via regno
estos redonita al vi, kiam vi konfesos la potencon de
la ĉielo. **27** Tial, ho reĝo, volu favore akcepti mian
konsilon: liberigu vin de viaj pekoj per justeco kaj
de viaj malbonagoj per favorkoreco al malriĉuloj;
per tio via bonstato fariĝos longedaŭra. **28** Ĉio ĉi tio

efektiviĝis sur la reĝo Nebukadnecar. 29 Post paso de
dek du monatoj, promenante tra la reĝa palaco en
Babel, 30 la reĝo ekparolis, kaj diris: Ĉu tio ne estas la
majesta Babel, kiun por restado de la reĝo mi aranĝis
per la forto de mia potenco kaj por la gloro de mia
majesto? 31 Kiam ĉi tiu parolo estis ankoraŭ en la
buŝo de la reĝo, eksonis voĉo el la ĉielo: Al vi, ho reĝo
Nebukadnecar, estas dirate: La regno estas prenata
for de vi; 32 kaj vi estas elpuŝata el meze de la homoj,
kaj vi vivos kun la bestoj de la kampo; per herbo oni
vin nutros, kiel bovojn; kaj sep jaroj pasos super vi,
ĝis vi ekscios, ke super la regno de homoj regas la
Plejaltulo, kaj donas ĝin al tiu, al kiu Li volas. 33 Tuj
plenumiĝis tiu verdikto sur Nebukadnecar; li estis
elpuŝita el meze de la homoj, li komencis manĝis
herbon, kiel bovoj, lia korpo estis trinkigata de la roso
de la ĉielo, tiel, ke liaj haroj kreskis kiel la plumoj de
aglo kaj liaj ungoj fariĝis kiel ĉe birdo. 34 Post paso
de la difinita tempo, mi, Nebukadnecar, levis miajn
okulojn al la ĉielo, kaj mia prudento revenis al mi; kaj
mi benis la Plejaltulon, mi laŭdis kaj gloris Tiun, kiu
vivas eterne, kies regado estas regado eterna kaj kies
regno daŭras en ĉiuj generacioj. 35 Ĉiuj, kiuj vivas sur
la tero, estas kalkuleblaj kiel nenio. Laŭ Sia volo Li
agas, kiel kun la armeo de la ĉielo, tiel kun la vivantoj
sur la tero; kaj ekzistas neniu, kiu povus kontraŭstari
al Lia mano, aŭ demandi Lin: Kion Vi faras? 36 En
tiu tempo revenis al mi mia prudento, kaj mi ricevis
denove mian reĝan honoron, mian majeston, kaj mian
antaŭan aspekton; tiam elserĉis min miaj konsilistoj
kaj miaj altranguloj, mi estis denove starigita super
mia regno, kaj mia majesto fariĝis ankoraŭ pli granda.
37 Nun mi, Nebukadnecar, laŭdas, altigas, kaj gloras la
Reĝon de la ĉielo, kies ĉiuj faroj estas veraj kaj kies
vojoj estas ĝustaj, kaj kiu la fierulojn povas humiligi.

**5** La reĝo Belŝacar faris grandan festenon por siaj
mil eminentuloj kaj multe drinkis kun tiuj mil.
2 Fariĝinte ebria, Belŝacar ordonis alporti la orajn
kaj arĝentajn vazojn, kiujn lia patro Nebukadnecar
venigis el la templo de Jerusalem, por ke el ili trinku la
reĝo kaj liaj eminentuloj, liaj edzinoj kaj kromvirinoj.
3 Tiam oni alportis la orajn vazojn, kiuj estis prenitaj
el la sanktejo de la domo de Dio en Jerusalem; kaj
trinkis el ili la reĝo kaj liaj eminentuloj, liaj edzinoj kaj
kromvirinoj. 4 Ili trinkis vinon, kaj gloris la diojn orajn
kaj arĝentajn, kuprajn, ferajn, lignajn, kaj ŝtonajn.
5 En tiu momento aperis fingroj de homa mano kaj
komencis skribi kontraŭ la kandelabro sur la kalkita
muro de la reĝa salono; kaj la reĝo vidis la manon,
kiu skribis. 6 Tiam ŝanĝiĝis la vizaĝaspekto de la
reĝo, liaj pensoj konfuziĝis, la ligiloj de liaj lumboj
malstreĉiĝis, kaj liaj genuoj tremante kunfrapiĝadis. 7
La reĝo laŭtege ekkriis, ke oni venigu la magiistojn,
Ĥaldeojn, kaj divenistojn. La reĝo ekparolis, kaj diris al
la saĝuloj de Babel: Kiu ajn tralegos ĉi tiun surskribon
kaj klarigos al mi ĝian signifon, tiu ricevos purpuran
veston, ora ĉeno estos sur lia kolo, kaj li estos la
tria reganto en la regno. 8 Tiam venis ĉiuj saĝuloj
de la reĝo; sed ili ne povis tralegi la surskribon, nek
klarigi al la reĝo ĝian signifon. 9 La reĝo Belŝacar
forte maltrankviliĝis, kaj lia vizaĝaspekto ŝanĝiĝis, kaj
antaŭ liaj eminentuloj konfuziĝis. 10 Ĉe tiu okazintaĵo,
kiu fariĝis al la reĝo kaj al liaj altranguloj, en la
salonon de la festeno eniris la reĝino. La reĝino
ekparolis, kaj diris: Ho reĝo, vivu eterne! Ne konsternu
vin viaj pensoj, kaj ne ŝanĝiĝu via vizaĝaspekto. 11 En
via regno ekzistas viro, kiu havas en si la spiriton de la
sanktaj dioj; en la tempo de via patro oni trovis en li
lumon, prudenton, kaj saĝon, similan al la saĝo de la
dioj; kaj la reĝo Nebukadnecar, via patro, la reĝo mem,
via patro, faris lin ĉefo de la astrologoj, sorĉistoj,
Ĥaldeoj, kaj divenistoj; 12 ĉar en li oni trovis altan
spiriton, scion, kaj prudenton, por klarigi sonĝojn,
komentarii sentencojn, kaj malkaŝi kaŝitaĵojn. Tio
estas Daniel, al kiu la reĝo donis la nomon Beltŝacar.
Tial oni voku Danielon, kaj li klarigos la signifon. 13
Tiam oni alkondukis Danielon antaŭ la reĝon; kaj la
reĝo ekparolis, kaj diris al Daniel: Ĉu vi estas Daniel,
unu el la forkaptitaj filoj de Judujo, kiujn mia patro,
la reĝo, venigis el Judujo? 14 Mi aŭdis pri vi, ke la
spirito de la dioj estas en vi, kaj ke lumo, prudento,
kaj eksterordinara saĝo troviĝas en vi. 15 Nun estis
alkondukitaj al mi la saĝuloj kaj magiistoj, por tralegi
ĉi tiun surskribon kaj klarigi al mi ĝian signifon; sed
ili ne povis klarigi al mi la sencon de ĉi tiuj vortoj. 16
Sed mi aŭdis pri vi, ke vi povoscias klarigi signifon
kaj malkaŝi kaŝitaĵon. Tial, se vi povas tralegi ĉi tiun
surskribon kaj klarigi al mi ĝian signifon, vi ricevos
purpuran veston, ora ĉeno estos sur via kolo, kaj
vi estos la tria reganto en la regno. 17 Tiam Daniel
respondis kaj diris al la reĝo: Viaj donacoj restu ĉe
vi, viajn rekompencojn donu al iu alia; mi tamen
tralegos al la reĝo la surskribon, kaj mi klarigos al li la

signifon. 18 Ho reĝo! Dio la Plejalta donis al via patro
Nebukadnecar regnon, potencon, honoron, kaj gloron.
19 Pro la potenco, kiun Li donis al li, ĉiuj popoloj,
gentoj, kaj lingvoj tremis kaj havis timon antaŭ li;
kiun li volis, li mortigis, kaj kiun li volis, li lasis vivi;
kiun li volis, li altigis, kaj kiun li volis, li malaltigis. 20
Sed kiam lia koro fieriĝis kaj lia spirito malhumiliĝis,
li estis deĵetita el sia reĝa trono kaj senigita je sia
gloro; 21 kaj li estis elpuŝita el meze de la homoj, kaj
lia koro fariĝis simila al koro de besto, kaj li vivis kun
sovaĝaj azenoj; li manĝis herbon, kiel la bovoj, kaj
lia korpo estis trinkigata per la roso de la ĉielo; ĝis
li eksciis, ke super la regno de homoj regas Dio la
Plejalta, kaj donas ĝin al tiu, al kiu Li volas. 22 Vi, lia
filo, ho Belŝacar, ne humiligis vian koron, kvankam vi
sciis ĉion tion; 23 sed vi levis vin kontraŭ la Reganton
de la ĉielo, tiel, ke la vazojn el Lia domo oni alportis
al vi, kaj vi kun viaj eminentuloj, kun viaj edzinoj
kaj kromvirinoj, trinkis vinon el ili; kaj vi gloris la
diojn arĝentajn kaj orajn, kuprajn, ferajn, lignajn, kaj
ŝtonajn, kiuj ne vidas, ne aŭdas, kaj ne pensas; kaj
Dion, en kies mano estas la spiro de via vivo kaj ĉiuj
viaj vojoj, vi ne gloris. 24 Pro tio estas sendita de Li
la mano kaj skribita ĉi tiu surskribo. 25 Jen estas la
surskribo, kiu estas desegnita: MENE, MENE, TEKEL,
UFARSIN. 26 Jen estas la signifo de la vortoj: MENE:
Dio kalkulis la tempon de via reĝado kaj metis al ĝi
finon; 27 TEKEL: vi estas pesita sur pesilo kaj trovita
tro malpeza; 28 PERES: via regno estas dividita kaj
donita al la Medoj kaj Persoj. 29 Tiam laŭ ordono de
Belŝacar oni metis purpuran veston sur Danielon kaj
oran ĉenon sur lian kolon, kaj oni proklamis lin la tria
reganto en la regno. 30 En tiu sama nokto Belŝacar,
reĝo de la Ĥaldeoj, estis mortigita. 31 Dario, la Medo,
ricevis la regnon, havante la aĝon de sesdek du jaroj.

6 Kaj Dario bonvolis starigi super sia regno cent
dudek satrapojn, por administri lian tutan regnon;
2 kaj super ili tri ĉefajn estrojn, inter kiuj estis ankaŭ
Daniel, por ke la satrapoj donadu al ili kalkulraportojn,
kaj por ke la reĝo ne havu malprofiton. 3 Sed Daniel
superis la aliajn ĉefajn estrojn kaj satrapojn, ĉar li
havis eksterordinaran saĝon; kaj la reĝo havis jam
la intencon starigi lin super la tuta regno. 4 Tiam la
ĉefaj estroj kaj la satrapoj komencis serĉi pretekston,
por akuzi Danielon koncerne la aferojn de la regno.
Sed ili povis trovi nenian pretekston nek kulpon; ĉar
li estis fidela, kaj nenia kulpo nek krimo estis trovebla
en li. 5 Tiam tiuj homoj diris: Ni ne povos trovi kulpon
en tiu Daniel, se ni ne trovos ion kontraŭ li en la
leĝoj de lia Dio. 6 Kaj tiuj ĉefaj estroj kaj satrapoj
venis al Dario, kaj diris al li tiel: Ho reĝo Dario, vivu
eterne! 7 Ĉiuj ĉefaj estroj de la regno, regionestroj,
satrapoj, konsilistoj, kaj militestroj interkonsentis, ke
oni devas elirigi reĝan dekreton kaj severe ordoni,
ke ĉiun, kiu en la daŭro de tridek tagoj petos ion de
ia dio aŭ homo anstataŭ de vi, ho reĝo, oni ĵetu en
kavon de leonoj. 8 Tial konfirmu, ho reĝo, ĉi tiun
decidon, kaj subskribu la ordonon, por ke ĝi ne estu
malobeata, kiel leĝo de Medujo kaj Persujo, kiun
neniu povas senvalorigi. 9 La reĝo Dario subskribis la
dekreton. 10 Kiam Daniel eksciis, ke estas subskribita
tia ordono, li iris en sian domon, kaj antaŭ la fenestroj
de sia ĉambro, malfermitaj en la direkto al Jerusalem,
li tri fojojn ĉiutage genuis kaj preĝis al sia Dio kaj
gloradis Lin, kiel li faradis antaŭe. 11 Tiam tiuj homoj
ĉirkaŭis Danielon, kaj trovis lin preĝanta kaj petanta
favorkorecon antaŭ sia Dio. 12 Kaj ili iris, kaj diris al la
reĝo koncerne la reĝan dekreton: Ĉu vi ne ordonis
per dekreto, ke ĉiun homon, kiu en la daŭro de tridek
tagoj petos ion de ia dio aŭ homo krom vi, ho reĝo, oni
ĵetu en kavon de leonoj? La reĝo respondis kaj diris:
Jes, tio efektive estas dekretita, kiel neforigebla leĝo
de Medujo kaj Persujo. 13 Tiam ili respondis kaj diris
al la reĝo: Jen Daniel, kiu estas el la transloĝigitaj filoj
de Judujo, ne atentas vin, ho reĝo, nek la dekreton,
subskribitan de vi, sed tri fojojn ĉiutage li preĝas
siajn preĝojn. 14 Aŭdinte tion, la reĝo forte afliktiĝis
en sia animo, kaj, dezirante savi Danielon, li multe
klopodis ĝis la subiro de la suno, por liberigi lin. 15
Sed tiuj homoj ĉirkaŭis la reĝon, kaj diris al li: Sciu,
ho reĝo, ke laŭ la leĝoj de Medujo kaj Persujo ĉiu
malpermeso aŭ ordono, konfirmita de la reĝo, devas
resti neŝanĝebla. 16 Tiam la reĝo ordonis, kaj oni
alkondukis Danielon, kaj ĵetis lin en kavon de leonoj.
Sed la reĝo diris al Daniel: Via Dio, al kiu vi senĉese
servas, savu vin! 17 Kaj oni alportis ŝtonon kaj metis
ĝin sur la aperturon de la kavo; kaj la reĝo sigelis ĝin
per sia ringo kaj per la ringo de siaj altranguloj, por
ke ne fariĝu ia ŝanĝo koncerne Danielon. 18 Poste la
reĝo iris en sian palacon, pasigis la nokton en fastado,
eĉ ne permesis alporti al li manĝaĵon; kaj ankaŭ dormi
li ne povis. 19 Matene la reĝo leviĝis ĉe la tagiĝo
kaj iris rapide al la kavo de la leonoj. 20 Kaj kiam li

alvenis al la kavo, li vokis per malĝoja voĉo Danielon;
kaj ekparolinte, la reĝo diris al Daniel: Ho Daniel,
servanto de la vivanta Dio! ĉu via Dio, al kiu vi senĉese
servas, povis savi vin de la leonoj? 21 Tiam Daniel
respondis al la reĝo: Ho reĝo, vivu eterne! 22 Mia Dio
sendis Sian anĝelon, kaj baris la buŝon de la leonoj,
kaj ili faris al mi nenian difekton; ĉar mi estis trovita
pura antaŭ Li; kaj ankaŭ antaŭ vi, ho reĝo, mi ne faris
krimon. 23 Tiam la reĝo tre ekĝojis pri li kaj ordonis
levi Danielon el la kavo. Kaj oni eligis Danielon el la
kavo, kaj nenia difekto montriĝis sur li; ĉar li kredis al
sia Dio. 24 Kaj la reĝo ordonis alkonduki tiujn virojn,
kiuj per sia akuzo volis pereigi Danielon, kaj ĵeti en la
kavon de la leonoj ilin mem, kaj ankaŭ iliajn infanojn
kaj iliajn edzinojn; kaj ankoraŭ antaŭ ol ili atingis la
fundon de la kavo, la leonoj kaptis ilin kaj frakasis
ĉiujn iliajn ostojn. 25 Post tio la reĝo Dario skribis al
ĉiuj popoloj, gentoj, kaj lingvoj de la tuta tero: Kresku
via bonfarto! 26 Mi donas ordonon, ke en ĉiu regiono
de mia regno oni timu kaj respektu Dion de Daniel;
ĉar Li estas Dio vivanta kaj eterne restanta, Lia regno
estas nedetruebla, kaj Lia regado estas senfina. 27 Li
liberigas kaj savas, Li faras miraklojn kaj pruvosignojn
en la ĉielo kaj sur la tero; Li savis Danielon kontraŭ
leonoj. 28 Kaj Daniel havis sukceson dum la reĝado de
Dario, kaj dum la reĝado de Ciro, la Perso.

**7** En la unua jaro de Belŝacar, reĝo de Babel, Daniel
havis sonĝon kaj vizion de sia kapo sur sia lito.
Li enskribis tiun sonĝon, prezentinte la esencon de
la afero. 2 Daniel komencis sian rakonton, dirante:
Mi vidis en mia nokta vizio, ke jen kvar ventoj de la
ĉielo batalas inter si sur granda maro. 3 Kaj eliris el la
maro kvar grandegaj bestoj malsimilaj unu al alia.
4 La unua estis kiel leono, sed ĝi havis flugilojn de
aglo; mi vidis, kiel fine oni deŝiris de ĝi la flugilojn,
oni levis ĝin de la tero, kaj starigis sur piedoj, kiel
homon, kaj homa koro estis donita al ĝi. 5 Jen ankaŭ
dua besto, simila al urso, staris ĉe ĝia flanko, kaj tri
kojnodentojn ĝi havis en sia buŝo, inter siaj dentoj.
Kaj estis dirite al ĝi: Leviĝu, kaj manĝu multe da
karno. 6 Poste mi vidis ankoraŭ unu beston, similan al
leopardo; sur sia dorso ĝi havis kvar flugilojn de birdo,
kaj kvar kapojn havis tiu besto, kaj potenco estis
donita al ĝi. 7 Poste mi vidis en la nokta vizio beston
kvaran, teruran, monstran, kaj tre fortan; ĝi havis
grandegajn ferajn dentojn; ĝi manĝegis kaj frakasis,
kaj la restaĵon ĝi dispremis per la piedoj; ĝi estis
malsimila al ĉiuj antaŭaj bestoj kaj havis dek kornojn.
8 Mi rigardis tiujn kornojn, kaj jen inter ili aperis alia
korno, malgranda; kaj tri el la antaŭaj kornoj estis
elŝiritaj antaŭ ĝi kun la radiko; kaj jen montriĝis,
ke tiu korno havas okulojn, kiel okuloj de homo, kaj
buŝon, kiu parolas malhumile. 9 Fine mi vidis, ke
estas starigitaj tronoj, kaj sidiĝis la Antaŭtempulo. Lia
vesto estis blanka kiel neĝo, kaj la haroj sur Lia kapo
estis kiel pura lano; Lia trono estis brilantaj flamoj,
ĝiaj radoj estis flamanta fajro. 10 Fajra rivero elfluis
kaj disverŝiĝis antaŭ Li; miloj da miloj servis al Li,
kaj dekmiloj da dekmiloj staris antaŭ Li. La juĝantoj
sidiĝis, kaj la libroj malfermiĝis. 11 Tiam mi vidis, kiel
fine, pro la malhumilaj vortoj, kiujn parolis la korno,
la besto estis mortigita, kaj ĝia korpo estis frakasita,
kaj ĵetita en fajron, por forbruli. 12 Ankaŭ de la aliaj
bestoj oni forprenis ilian potencon, kaj daŭro de la
vivo estis donita al ili nur por difinita tempo kaj ĝis
difinita templimo. 13 Poste mi vidis en la nokta vizio,
ke jen en la nuboj de la ĉielo iris kvazaŭ filo de homo,
venis al la Antaŭtempulo, kaj estis alkondukita al Li. 14
Kaj al li estis donita potenco, gloro, kaj regno, por ke
ĉiuj popoloj, gentoj, kaj lingvoj servu al li; lia regado
estas regado eterna, kiu ne ĉesiĝos, kaj lia regno ne
detruiĝos. 15 Ĉe mi, Daniel, ektremis mia spirito en
mia korpo, kaj la vizio de mia kapo konsternis min. 16
Mi aliris al unu el la antaŭstarantoj kaj demandis lin
pri la vera signifo de ĉio ĉi tio, kaj li komencis paroli
al mi kaj klarigis al mi la sencon de la diritaĵo. 17 Tiuj
kvar grandaj bestoj signifas, ke kvar regnoj formiĝos
sur la tero. 18 Poste prenos la regnon la sanktuloj
de la Plejaltulo, kaj ili posedos la regnon eterne, en
eterna eterneco. 19 Tiam mi deziris havi precizan
klarigon pri la kvara besto, kiu estis malsimila al
ĉiuj, kaj terura, kun feraj dentoj kaj kupraj ungegoj,
manĝegis kaj frakasis kaj la restaĵon dispremis per la
piedoj; 20 kaj pri la dek kornoj, kiuj estis sur ĝia kapo,
kaj pri la alia, kiu poste eliris kaj antaŭ kiu elfalis
tri, pri tiu sama korno, kiu havis okulojn kaj buŝon
parolantan malhumile, kaj kiu laŭ sia aspekto estis pli
granda ol la aliaj. 21 Mi vidis, kiel tiu korno komencis
bataladon kontraŭ la sanktuloj kaj estis jam venkanta
ilin, 22 ĝis venis la Antaŭtempulo; tiam la juĝo estis
farita por la sanktuloj de la Plejaltulo, kaj venis la
tempo, kiam la regnon ekposedis la sanktuloj. 23 Kaj li
diris: La kvara besto estas la kvara regno, kiu estos

sur la tero, malsimila al ĉiuj regnoj, kaj ĝi manĝegos
la tutan teron, piedpremos kaj frakasos ĝin. 24 La dek
kornoj signifas, ke el tiu regno aperos dek reĝoj, kaj
post ili eliros alia, malsimila al la antaŭaj, kaj faligos
tri reĝojn. 25 Li blasfemos kontraŭ la Plejaltulo kaj
frapos la sanktulojn de la Plejaltulo; li eĉ arogos al
si ŝanĝi la tempojn kaj leĝojn. Ili estos transdonitaj
en lian manon ĝis paso de unu tempo kaj du tempoj
kaj duono de tempo. 26 Poste aperos juĝo, kaj ĝi
forprenos de li la potencon, por lia pereo kaj plena
ekstermiĝo. 27 Sed la regado, potenco, kaj grandeco
de la regnoj sub la tuta ĉielo estos donita al la sankta
popolo de la Plejaltulo, kies regno estas regno eterna,
kaj ĉiuj potenculoj servados kaj obeados al Li. 28 Ĉi tie
finiĝas la parolo. Mi, Daniel, estis tre konsternita de
mia meditado, kaj mia vizaĝaspekto ŝanĝiĝis sur mi;
sed la parolon mi konservis en mia koro.

**8** En la tria jaro de reĝado de la reĝo Belŝacar aperis
al mi, al Daniel, vizio, post tiu, kiu aperis al mi en
la komenco. 2 Kiam mi vidis la vizion, mi estis en la
kastelurbo Ŝuŝan, kiu troviĝas en la lando Elam; sed en
la vizio mi vidis, ke mi estas ĉe la rivero Ulaj. 3 Mi levis
miajn okulojn, kaj mi ekvidis: jen unu virŝafo staras ĉe
la rivero; ĝi havas du kornojn, kaj ambaŭ kornoj estas
altaj, sed unu estas pli alta ol la dua, kaj la pli alta
elkreskis poste. 4 Mi vidis, ke tiu virŝafo kornopuŝas
okcidenten, norden, kaj suden, kaj nenia besto povas
kontraŭstari al ĝi, kaj neniu povas savi kontraŭ ĝia
forto; kaj ĝi faras ĉion, kion ĝi volas, kaj ĝi estas
granda. 5 Dum mi atente ĝin rigardis, jen de okcidente
iras virkapro sur la tutan teron, kaj ĝi ne tuŝas la
teron. Tiu virkapro havis bone videblan kornon inter
siaj okuloj. 6 Kaj ĝi iris al tiu kornohava virŝafo, kiun
mi vidis starantan ĉe la rivero, kaj ĵetis sin sur ĝin kun
furioza forto; 7 kaj mi vidis, ke, alproksimiĝinte al la
virŝafo, ĝi furioziĝis kontraŭ ĝi, frapis la virŝafon, kaj
rompis ambaŭ ĝiajn kornojn; kaj la virŝafo ne havis la
forton, por kontraŭstari al ĝi, kaj ĉi tiu ĵetis ĝin sur la
teron kaj disbatis ĝin per la piedoj; kaj neniu povis
savi la virŝafon kontraŭ ĝia forto. 8 Tiam la virkapro
forte grandiĝis. Kiam ĝi fariĝis tre forta, rompiĝis la
granda korno, kaj anstataŭ ĝi eliris kvar aliaj en la
direkto al la kvar ventoj de la ĉielo. 9 El unu el ili
eliris alia korno malgranda, kiu forte kreskis suden
kaj orienten kaj al la plej bela lando. 10 Kaj ĝi kreskis
ĝis la armeo de la ĉielo, kaj ĝi ĵetis sur la teron parton
de tiu armeo kaj de la steloj, kaj dispremis ilin per
la piedoj. 11 Kaj eĉ kontraŭ la armeestron ĝi leviĝis,
forprenis de li la ĉiutagajn oferojn, kaj ruinigis lian
sanktan loĝejon. 12 Forto estis donita al ĝi kontraŭ la
ĉiutagaj oferoj pro peko; kaj ĝi ĵetis la veron sur la
teron kaj laboris kun sukceso. 13 Kaj mi aŭdis unu
sanktulon, kiu parolis, kaj tiu sanktulo diris al iu, kiu
demandis: Ĝis kiam havos forton la profetaĵo pri la
ĉiutagaj oferoj kaj pri la terura peko, ke la sanktejo
kaj la armeo estos piedpremataj? 14 Kaj li diris al
mi: Ĝis pasos du mil tricent vesperoj kaj matenoj;
tiam la sanktejo denove estos sanktigita. 15 Dum mi,
Daniel, estis rigardanta tiun vizion kaj serĉanta ĝian
signifon, jen stariĝis antaŭ mi bildo de viro. 16 Kaj el
meze de Ulaj mi aŭdis homan voĉon, kiu vokis kaj
diris: Gabriel, klarigu al li la vizion. 17 Kaj li aliris al
tiu loko, kie mi staris; kaj kiam li venis, mi eksentis
teruron kaj falis vizaĝaltere; kaj li diris al mi: Sciu, ho
homido, ke la vizio koncernas la finon de la tempo. 18
Kiam li parolis al mi, mi kuŝis senkonscie sur la tero;
sed li ektuŝis min kaj starigis min sur mia loko. 19
Kaj li diris: Jen mi sciigas al vi, kio estos ĉe la fino de
la kolero; ĉar tio koncernas la finan tempon. 20 La
virŝafo, kiun vi vidis kun la du kornoj, estas la reĝoj
de Medujo kaj Persujo; 21 kaj la vila virkapro estas
la reĝo de Grekujo; la granda korno inter ĝiaj okuloj
estas la unua reĝo; 22 ĝi rompiĝis, kaj anstataŭ ĝi eliris
kvar aliaj; kvar regnoj formiĝos el la nacio, sed ne
tiel fortaj, kiel ĝi estis antaŭe. 23 En la fina tempo de
tiuj regnoj, kiam la perfiduloj havos sukceson, aperos
reĝo malmodesta, lerta ruzulo. 24 Li fariĝos potenca,
sed ne per sia forto; li faros grandan dezertigadon, li
havos sukceson en siaj faroj, li pereigos fortulojn kaj
la popolon de la sanktuloj. 25 Kaj pro lia saĝeco liaj
ruzaĵoj sukcesos en lia mano, kaj li fieriĝos, kaj meze
de paco li multajn pereigos, kaj li leviĝos kontraŭ la
Princon de la princoj; sed li estos frakasita, kvankam
ne per mano. 26 La vizio pri la vespero kaj la mateno,
kiu estas dirita al vi, estas vera; sed tenu la vizion
sekrete, ĉar ĝi rilatas tempon malproksiman. 27 Kaj
mi, Daniel, senfortiĝis, kaj estis malsana dum kelke da
tagoj. Poste mi leviĝis kaj komencis okupadi min per
la aferoj de la reĝo. Mi estis konsternita de la vizio,
sed neniu tion rimarkis.

**9** En la unua jaro de Dario, filo de Aĥaŝveroŝ, el la
gento Meda, kiu fariĝis reĝo super la regno de la

Ĥaldeoj, 2 en la unua jaro de lia reĝado, mi, Daniel,
rimarkis en la libroj la nombron de la jaroj, pri kiuj
la Eternulo parolis al la profeto Jeremia, ke devas
finiĝi sepdek jaroj de la dezerteco de Jerusalem. 3
Kaj mi turnis mian vizaĝon al Dio, la Sinjoro, por
preĝi kaj petegi, en fastado, sakaĵo, kaj cindro. 4 Kaj
mi preĝis al la Eternulo, mia Dio, mi faris konfeson,
kaj mi diris: Mi petas Vin, ho Sinjoro, Dio granda kaj
timinda, kiu konservas la interligon kaj favorkorecon
al Liaj amantoj kaj al la plenumantoj de Liaj ordonoj!
5 Ni pekis, ni malbonagis, ni estis malpiaj, ni ribelis,
kaj ni defalis de Viaj ordonoj kaj decidoj; 6 ni ne
aŭskultis Viajn servantojn, la profetojn, kiuj parolis
en Via nomo al niaj reĝoj, estroj, kaj patroj, kaj al la
tuta popolo de la lando. 7 Vi, ho Sinjoro, estas prava,
kaj ni devas honti, kiel nun, ĉiu Judo, la loĝantoj
de Jerusalem kaj la tuta Izrael, la proksimaj kaj la
malproksimaj, en ĉiuj landoj, kien Vi dispelis ilin pro
iliaj malbonagoj, kiujn ili faris koncerne Vin. 8 Ho
Sinjoro! ni hontas pro niaj reĝoj, estroj, kaj patroj,
kiuj pekis antaŭ Vi. 9 Sed la Sinjoro, nia Dio, havas
kompatemon kaj pardonemon, kvankam ni defalis de
Li 10 kaj ne aŭskultis la voĉon de la Eternulo, nia Dio,
por iradi laŭ Liaj instruoj, kiujn Li donis al ni per Siaj
servantoj, la profetoj. 11 La tuta Izrael malobeis Vian
instruon, kaj deturnis sin, por ne aŭskulti Vian voĉon;
pro tio trafis nin la malbeno kaj la ĵuro, pri kiuj estas
skribite en la instruo de Moseo, servanto de Dio; ĉar ni
pekis kontraŭ Li. 12 Kaj Li plenumis Sian vorton, kiun
Li diris pri ni, kaj pri niaj juĝistoj, kiuj faradis juĝon
ĉe ni, kaj Li venigis sur nin grandan malfeliĉon; sub la
tuta ĉielo nenie fariĝis tio, kio fariĝis al Jerusalem. 13
Kiel estas skribite en la instruo de Moseo, tiel trafis
nin tiu tuta malfeliĉo; ni tamen ne preĝis antaŭ la
Eternulo, nia Dio, deturnante nin de niaj malbonagoj
kaj penante kompreni Vian veron. 14 Kaj la Eternulo
viglis super la malfeliĉo kaj venigis ĝin sur nin; ĉar
justa estas la Eternulo, nia Dio, en ĉiuj Siaj faroj, kiujn
Li faras, sed ni ne aŭskultis Lian voĉon. 15 Kaj nun, ho
Sinjoro, nia Dio, kiu elkondukis Vian popolon el la
lando Egipta per forta mano, kaj faris al Vi gloran
nomon, kiel ĝi nun estas, ni pekis, ni estis malpiaj.
16 Ho Sinjoro, konforme al Via tuta bonfaremeco
deturniĝu nun Via kolero kaj Via indigno de Via urbo
Jerusalem, de Via sankta monto; ĉar pro niaj pekoj kaj
pro la malbonagoj de niaj patroj Jerusalem kaj Via
popolo estas hontindaĵo antaŭ ĉiuj niaj ĉirkaŭantoj.
17 Kaj nun aŭskultu, ho nia Dio, la preĝon de Via
servanto kaj lian petegon, kaj lumu per Via vizaĝo sur
Vian dezertigitan sanktejon, pro la Sinjoro. 18 Klinu,
ho mia Dio, Vian orelon, kaj aŭskultu; malfermu Viajn
okulojn, kaj vidu nian ruinigitecon, kaj la urbon, kiu
estas nomata per Via nomo; ĉar ne pro nia praveco,
sed pro Via granda kompatemeco, ni faligas antaŭ
Vi nian preĝon. 19 Ho Sinjoro, aŭskultu! ho Sinjoro,
pardonu! ho Sinjoro, atentu kaj agu, ne prokrastu, pro
Vi mem, ho mia Dio, ĉar Vian nomon portas Via urbo
kaj Via popolo. 20 Dum mi ankoraŭ parolis kaj preĝis
kaj konfesis miajn pekojn kaj la pekojn de mia popolo
Izrael kaj metis mian petegon antaŭ la Eternulon,
mian Dion, pri la sankta monto de mia Dio; 21 dum
mi ankoraŭ parolis preĝante, la viro Gabriel, kiun
mi vidis antaŭe en la vizio, alflugis, kaj ektuŝis min
ĉirkaŭ la tempo de la vespera ofero; 22 kaj, klarigante,
li ekparolis al mi, kaj diris: Ho Daniel, nun mi eliris,
por komprenigi al vi la aferon. 23 Ĉe la komenco de
via preĝado eliris ordono, kaj mi venas, por sciigi ĝin,
ĉar vi estas homo agrabla al Dio; atentu la vorton,
kaj komprenu la vizion. 24 Sepdek jarsepoj estas
destinitaj por via popolo kaj por via sankta urbo, por
ke kovriĝu la kulpo, sigeliĝu la pekoj, kaj pardoniĝu la
malbonagoj, por ke venu justeco eterna, sigeliĝu la
vizio kaj profetaĵo, kaj sanktoleiĝu Plejsanktulo. 25
Sciu, kaj komprenu: de la momento, kiam eliros la
ordono, ke Jerusalem estu denove konstruata, ĝis la
sanktoleado de la estro pasos sep jarsepoj kaj sesdek
du jarsepoj; kaj denove estos konstruitaj la stratoj kaj
muroj, kvankam en tempo malfacila. 26 Post la sesdek
du jarsepoj la sanktoleito estos pereigita kaj jam ne
ekzistos; kaj la urbon kun ĝia sanktejo pereigos popolo
de estro, kiu venos, kaj ĝia fino estos kiel de inundego;
kaj ĝis la fino de la milito ĝi estos tute dezertigita.
27 En la daŭro de unu jarsepo estos konfirmita la
interligo kun multaj, kaj meze de la jarsepo estos
ĉesigitaj buĉoferoj kaj farunoferoj; sur la flugiloj de
la sanktejo estos abomeninda dezerteco, ĝis la fina
destinita pereo falos sur la ruinojn.

## 10

En la tria jaro de Ciro, reĝo de Persujo, vorto
estis malkaŝita al Daniel, kiu havis la nomon
Beltŝacar; kaj vera estis tiu vorto kaj tre grava. Li
komprenis la vorton kaj komprenis bone la vizion. 2
En tiu tempo mi, Daniel, funebris dum tri semajnoj. 3
Bongustan manĝaĵon mi ne manĝis, viando kaj vino

ne venis en mian buŝon, kaj per oleo mi min ne
ŝmiris, ĝis la fino de la tri semajnoj. 4 En la dudek-
kvara tago de la unua monato mi estis sur la bordo de
granda rivero, nome de Ĥidekel. 5 Kaj levinte miajn
okulojn, mi ekvidis: jen staras unu viro, vestita per
tolaj vestoj, kaj liaj lumboj estas zonitaj per pura
oro el Ufaz. 6 Lia korpo estas kiel turkiso, lia vizaĝo
aspektas kiel fulmo, liaj okuloj kiel fajraj flamoj, liaj
brakoj kaj kruroj kiel brilanta kupro, kaj la voĉo de
lia parolado estas kiel voĉo de amaso da homoj. 7
Nur mi sola, Daniel, vidis tiun vizion; la homoj, kiuj
estis kun mi, ne vidis la vizion; tamen granda timo
falis sur ilin, kaj ili forkuris, por sin kaŝi. 8 Mi restis
sola, kaj mi rigardis tiun grandan vizion; ne restis
en mi forto, mia vizaĝaspekto ŝanĝiĝis terure, kaj mi
ne povis rekolekti miajn fortojn. 9 Kaj mi ekaŭdis la
voĉon de liaj vortoj; kaj kiam mi ekaŭdis la voĉon de
liaj vortoj, mi senkonscie falis vizaĝaltere. 10 Sed jen
mano ektuŝis min kaj levis min sur miajn genuojn
kaj manplatojn. 11 Kaj li diris al mi: Ho Daniel, viro
agrabla al Dio! atentu la vortojn, kiujn mi diros al vi,
kaj stariĝu sur via loko, ĉar mi nun estas sendita al vi.
Kiam li tion parolis al mi, mi staris tremante. 12 Li
diris al mi: Ne timu, Daniel, ĉar de la unua tago, kiam
vi sincere penis kompreni kaj pentofari antaŭ via Dio,
viaj vortoj estis aŭditaj; kaj mi venis laŭ via peto. 13
Sed la protektanto de la Persa regno kontraŭstaris al
mi dum dudek unu tagoj, kaj, ĝis Miĥael, unu el la plej
ĉefaj protektantoj, venis kun helpo al mi, mi restis tie
apud la reĝoj de Persujo. 14 Nun mi venis, por informi
vin, kio estos kun via popolo en la estonta tempo,
ĉar la vizio koncernas tempon estontan. 15 Dum li
parolis al mi tiujn vortojn, mi almetis mian vizaĝon al
la tero kaj silentis. 16 Sed jen iu, simila al homido,
ektuŝis miajn lipojn, kaj mi malfermis mian buŝon,
ekparolis kaj diris al tiu, kiu staris kontraŭ mi: Ho mia
sinjoro, de ĉi tiu vizio kurbiĝis mia vizaĝo, kaj mi jam
ne havas fortojn. 17 Kaj kiel la sklavo de mia sinjoro
povas paroli kun tia mia sinjoro, se mi jam ne havas
forton kaj mi jam ne havas spiron? 18 Tiam denove
ektuŝis min tiu bildo de homo kaj refortigis min. 19
Kaj li diris: Ne timu, ho simpatia homo, paco estu al vi,
kaj estu kuraĝa. Kaj dum li parolis al mi, mi kuraĝiĝis,
kaj diris: Parolu, ho mia sinjoro, ĉar vi min refortigis.
20 Tiam li diris: Ĉu vi scias, por kio mi venis al vi? nun
mi iras denove, por batali kontraŭ la protektanto de
Persujo; sed kiam mi foriros, venos la protektanto de
Grekujo. 21 Tamen mi sciigos al vi, kio estas notita
en la vera skribo; kaj estas neniu, kiu subtenus min
kontraŭ tiuj, krom Miĥael, via protektanto.

11 En la unua jaro de Dario, la Medo, mi staris, por
subteni kaj fortigi min. 2 Kaj nun mi sciigos al vi
la veron: jen ankoraŭ tri reĝoj estos en Persujo; la
kvara superos ĉiujn per sia riĉeco; kaj kiam li fariĝos
forta per sia riĉeco, li ekscitos ĉiujn kontraŭ la regnon
Grekan. 3 Aperos reĝo potenca, kiu regos kun granda
forto, kaj faros ĉion, kion li volos. 4 Sed dum lia
starado lia regno disrompiĝos kaj dividiĝos laŭ la kvar
ventoj de la ĉielo, kaj ĝi transiros ne al liaj idoj, kaj
ne kun tiu potenco, kun kiu li regis; lia regno estos
disŝirita kaj transiros al homoj fremdaj. 5 Fortiĝos
unu el liaj princoj, la reĝo suda, kaj fariĝos pli forta ol
li, kaj regos; lia potenco estos granda. 6 Sed post kelke
da jaroj ili kuniĝos inter si; kaj la filino de la suda
reĝo venos al la norda reĝo, por aranĝi la aferon inter
ili; sed ŝi ne retenos la forton en sia mano, kaj ankaŭ
li kun sia forto ne restos; ŝi kaj ŝiaj akompanantoj
kaj ŝia infano kaj ŝia kelktempa fortiganto estos
transdonitaj. 7 Tamen el ŝia trunko aperos branĉo,
venos kun militistaro, venos al la fortikaĵo de la norda
reĝo, kaj venkos. 8 Ankaŭ iliajn diojn, kun iliaj statuoj,
kaj kun iliaj grandvaloraj vazoj arĝentaj kaj oraj, li
forportos en Egiptujon, kaj por kelke da jaroj li restos
malproksima de la norda reĝo. 9 Ĉi tiu iros al la regno
de la suda reĝo, sed revenos en sian landon. 10 Poste
liaj filoj sin armos kaj kolektos grandan militistaron;
kaj unu iros rapide, disverŝiĝos kiel inundo, kaj denove
faros militon ĝis lia fortikaĵo. 11 Tiam la suda reĝo
indignos, eliros kaj militos kontraŭ li, kontraŭ la
norda reĝo, kaj starigos grandan homomulton, kaj
tiu homamaso estos transdonita en lian manon. 12 Li
forkondukos tiun homamason, kaj fieriĝos lia koro;
sed kvankam li venkos multajn milojn, li tamen ne
fariĝos pli forta. 13 La norda reĝo denove starigos
homomulton, pli grandan ol la antaŭa, kaj post kelka
tempo li eliros kun granda militistaro kaj kun granda
riĉeco. 14 En tiu tempo multaj stariĝos kontraŭ la suda
reĝo, kaj malkvietaj filoj de via popolo leviĝos, por ke
plenumiĝu la profetaĵo, sed ili falos. 15 Kaj venos la
norda reĝo, ŝutaranĝos remparon, kaj venkoprenos la
fortikigitan urbon; kaj la forto de la sudo ne povos
kontraŭstari, kaj ĝia plej bona militistaro ne havos
forton, por rezisti. 16 Kaj ĉiu, kiu venos al li, faros

tion, kion li postulos, neniu povos kontraŭstari al li; li
stariĝos en la plej bela lando, kaj pereigos ĝin per sia
mano. 17 Kaj li intencos veni kun la potenco de sia
tuta regno kaj kun siaj bravuloj, kaj li tion faros; kaj la
urbo de virinoj estos donita al li por ekstermi; kaj ĝi ne
povos kontraŭstari; sed ĝi ankaŭ ne fariĝos lia. 18 Kaj
li direktos sian vizaĝon al la insuloj kaj venkoprenos
multajn; sed unu princo ĉesigos lian malhonoradon,
ke li ne plu malhonoru. 19 Tiam li denove turnos sin
al la fortikaĵoj de sia lando; sed li falpuŝiĝos, falos, kaj
oni lin jam ne trovos. 20 Sur lia loko stariĝos tia, kiu
sendos impostiston tra la tuta glora regno; sed post
kelke da tagoj li pereos, kvankam ne per kolero kaj ne
per batalo. 21 Sur lia loko stariĝos homo malestimata,
sur kiun oni ne metos la reĝan ornamon; sed li venos
kun trankvileco, kaj ekposedos la regnon per flataĵoj.
22 Kaj la dronigantaj taĉmentegoj estos dronigitaj kaj
frakasitaj de li, kaj ankaŭ la princo, kun kiu estis farita
la interligo. 23 Kaj post la interamikiĝo li faros kontraŭ
li malicaĵon, iros, kaj superfortos lin per malmulte da
homoj. 24 En la pacajn kaj plej bonstatajn urbojn de la
lando li venos, kaj faros tion, kion ne faris liaj patroj
nek liaj prapatroj; la kaptaĵon, rabaĵon, kaj havaĵon
li disĵetos; kaj li direktos siajn intencojn kontraŭ
la fortikigitajn urbojn, sed nur ĝis certa tempo. 25
Poste li ekscitos sian forton kaj sian koron kontraŭ
la reĝon sudan kun grandega militistaro, kaj la suda
reĝo eliros milite kun granda kaj tre forta militistaro;
sed li ne eltenos, ĉar estos faritaj atencoj kontraŭ li.
26 Tiuj, kiuj manĝas ĉe lia tablo, pereigos lin, kaj lia
armeo disverŝiĝos, kaj falos multe da mortigitoj. 27
Ambaŭ reĝoj havos en sia koro malbonajn intencojn,
kaj ĉe la sama tablo ili parolos malveraĵon; sed ili
ne sukcesos, ĉar la fino estas ankoraŭ prokrastita
ĝis certa tempo. 28 Li iros returne al sia lando kun
granda havaĵo, kaj kun intencoj kontraŭ la sankta
interligo; kaj li plenumos, kaj venos en sian landon.
29 En difinita tempo li denove iros suden; sed la lasta
fojo ne estos tia, kiel la unua. 30 Ĉar venos kontraŭ
lin ŝipoj de la Kitidoj, kaj li perdos la kuraĝon; kaj li
denove fariĝos kolera kontraŭ la sankta interligo, kaj
denove agos kaj interkonsentos kun la forlasintoj de
la sankta interligo. 31 Helpantoj estos starigitaj de li;
ili malsanktigos la fortodonan sanktejon, ĉesigos la
ĉiutagajn oferojn, kaj faros abomenindan ruinigon. 32
Tiujn, kiuj malbonagas kontraŭ la interligo, li allogos
per flataĵoj. Sed la homoj, kiuj konas sian Dion, fariĝos
kuraĝaj kaj komencos agi. 33 La klerigantoj de la
popolo klerigos multajn, kvankam dum kelka tempo
ili falados de glavo, fajro, mallibereco, kaj prirabado.
34 Dum sia falado ili ricevos kelkan helpon, sed multaj
aliĝos al ili hipokrite. 35 Kelkaj el la klerigantoj falos
por tio, ke ili refandiĝu, puriĝu, kaj blankiĝu ĝis la
fina tempo; ĉar estas ankoraŭ tempo. 36 La reĝo
farados, kion li volos, kaj li fieriĝos, kaj rigardos
sin kiel pli altan ol ĉiu dio, kaj pri Dio de la dioj li
parolos teruraĵojn, kaj li havos sukceson, ĝis pleniĝos
la kolero; ĉar kio estas decidita, tio plenumiĝos. 37 Kaj
pri la dioj de siaj patroj li ne pensos, li ne atentos
ĉarmon de virinoj, nek ian dion, sed li tenos sin pli
alte ol ĉio. 38 Nur la dion de fortikaĵoj sur sia loko
li honoros, kaj tiun dion, kiun ne konis liaj patroj,
li honoros per oro, arĝento, multekostaj ŝtonoj, kaj
juveloj. 39 Kaj li konstruos por la urboj fortikaĵojn
sub la nomo de fremda dio; kiu akceptos ĉi tiun, al
tiu li plimultigos la honorojn kaj donos potencon
super multaj kaj rekompence disdonos teron. 40 Fine
ekbatalos kontraŭ li la suda reĝo, kaj ĵetos sin sur
lin la norda reĝo kun ĉaroj, rajdistoj, kaj multe da
ŝipoj, atakos la regionojn, inundos, kaj trairos. 41 Kaj
li venos en la plej belan landon, kaj multaj pereos;
saviĝos kontraŭ lia mano nur jenaj: Edom, Moab, kaj
la ĉefaj el la Amonidoj. 42 Kaj li etendos sian manon
kontraŭ diversajn landojn; ankaŭ la lando Egipta ne
saviĝos. 43 Kaj li fariĝos mastro super la trezoroj
de oro, arĝento, kaj ĉiuj grandvaloraĵoj de Egiptujo;
Luboj kaj Etiopoj sekvos liajn paŝojn. 44 Sed ektimigos
lin famoj de oriento kaj de nordo, kaj li eliros kun
granda furiozo, por pereigi kaj ekstermi multajn. 45
Kaj li starigos sian belegan tendon inter la maro kaj la
monto de la bela sanktejo; sed li venos al sia fino, kaj
neniu helpos al li.

12 En tiu tempo leviĝos Miĥael, la granda
protektanto, kiu defendas la filojn de via popolo;
kaj venos tempo malfacila, kia ne ekzistis de tiu
tempo, kiam aperis homoj, ĝis la nuna tempo; sed
saviĝos en tiu tempo el via popolo ĉiuj, kiuj troviĝos
enskribitaj en la libro. 2 Kaj multaj el tiuj, kiuj dormas
en la tero, vekiĝos, unuj por vivo eterna, aliaj por
eterna malhonoro kaj honto. 3 Kaj la klerigantoj
brilos, kiel la brilo de la ĉielo; kaj la virtigantoj de
multaj, kiel steloj por ĉiam kaj eterne. 4 Kaj vi, ho
Daniel, kaŝu la vortojn kaj sigelu la libron ĝis la fina

tempo; multaj ĝin tralegos, kaj multiĝos la scio. 5
Tiam mi, Daniel, ekrigardis, kaj jen staras du aliaj, unu
sur unu bordo de la rivero kaj la dua sur la alia bordo
de la rivero. 6 Kaj li diris al la viro en la tolaj vestoj,
kiu staris super la akvo de la rivero: Kiam estos la fino
de la mirindaĵoj? 7 Kaj mi aŭskultis la viron en la tolaj
vestoj, kiu staris super la akvo de la rivero; li levis
sian dekstran manon kaj sian maldekstran manon
al la ĉielo, kaj ĵuris per Tiu, kiu vivas eterne, ke tio
estos post la paso de tempo kaj tempoj kaj duono de
tempo; kaj kiam finiĝos la dissemiteco de la sankta
popolo, tiam plenumiĝos ĉio ĉi tio. 8 Mi aŭdis, sed
mi ne komprenis; kaj mi diris: Ho mia sinjoro, kio
estos post tio? 9 Kaj li respondis: Iru, Daniel, ĉar tio
estas kaŝita kaj sigelita ĝis la fina tempo. 10 Multaj
estos purigitaj, blankigitaj, kaj elprovitaj; la malpiuloj
faros malpiaĵojn, kaj ĉiuj malpiuloj ne komprenos;
sed la klerigantoj komprenos. 11 Kaj de la tempo,
kiam ĉesiĝos la ĉiutagaj oferoj kaj fariĝos abomeninda
ruiniĝo, pasos mil ducent naŭdek tagoj. 12 Feliĉa estas
tiu, kiu atendas kaj atingos la tempon de mil tricent
tridek kvin tagoj! 13 Kaj vi, ho Daniel, foriru ĝis la
fino; kaj ripozu, kaj vi stariĝos por via sorto en la fino
de la tempoj.

# Hoŝea

1 Vorto de la Eternulo, kiu aperis al Hoŝea, filo de
Beeri, en la tempo de Uzija, Jotan, Aĥaz, kaj Ĥizkija,
reĝoj de Judujo, kaj en la tempo de Jerobeam, filo
de Joaŝ, reĝo de Izrael. 2 Kiam la Eternulo komencis
paroli al Hoŝea, la Eternulo diris al Hoŝea: Iru, prenu
al vi edzinon malĉastulinon kaj naskigu infanojn
malĉastajn, ĉar la lando malĉastiĝis for de la Eternulo.
3 Kaj li iris, kaj prenis Gomeron, filinon de Diblaim; kaj
ŝi gravediĝis kaj naskis al li filon. 4 Kaj la Eternulo diris
al li: Donu al li la nomon Jizreel; ĉar baldaŭ Mi punos
pro la sango de Jizreel la domon de Jehu, kaj Mi metos
finon al la regno de la domo de Izrael. 5 En tiu tempo
Mi rompos la pafarkon de Izrael en la valo Jizreel.
6 Kaj ŝi denove gravediĝis kaj naskis filinon; kaj Li
diris al li: Donu al ŝi la nomon Lo-Ruĥama; ĉar Mi ne
plu kompatos la domon de Izrael, sed postulos de ili
pagon. 7 Tamen la domon de Jehuda Mi kompatos, kaj
Mi helpos al ili per la Eternulo, ilia Dio; Mi ne helpos
al ili per pafarko, glavo, kaj batalo, nek per ĉevaloj
kaj rajdantoj. 8 Kiam ŝi demamigis Lo-Ruĥaman, ŝi
graviediĝis kaj naskis filon. 9 Kaj Li diris: Donu al li la
nomon Lo-Ami; ĉar vi ne estas Mia popolo, kaj Mi
ne estos por vi. 10 Tamen la nombro de la Izraelidoj
estos kiel la sablo ĉe la maro, ne mezurebla kaj ne
kalkulebla. Kaj sur la sama loko, kie estis dirite al ili:
Vi ne estas Mia popolo, oni diros al ili: Infanoj de la
vivanta Dio. 11 Kolektiĝos kune la idoj de Jehuda kaj
la idoj de Izrael, kaj faros al si unu ĉefon, kaj iros el la
lando; ĉar granda estos la tago de Jizreel.

2 Nomu viajn fratojn Mia popolo, kaj viajn fratinojn
Kompatataj. 2 Havu juĝon kontraŭ via patrino,
havu juĝon, ĉar ŝi ne estas Mia edzino, kaj Mi ne estas
ŝia edzo; ŝi forigu la malĉastecon de sia vizaĝo kaj la
adultemecon de siaj mamoj, 3 por ke Mi ne senvestigu
ŝin ĝis nudeco, kaj ne prezentu ŝin tia, kia ŝi estis en
la tago de sia naskiĝo, ke Mi ne faru ŝin kiel dezerto,
ne faru ŝin kiel tero senakva, kaj ne mortigu ŝin per
soifo. 4 Ankaŭ ŝiajn infanojn Mi ne kompatus, ĉar ili
estas infanoj de malĉasto; 5 ĉar ilia patrino malĉastis,
ilia naskintino malhonoris sin; ĉar ŝi diris: Mi sekvos
miajn amistojn, kiuj donas al mi mian panon kaj
mian akvon, miajn lanaĵojn kaj miajn linaĵojn, mian
oleon kaj miajn drinkaĵojn. 6 Pro tio Mi baros vian
vojon per dornoj, Mi ĉirkaŭbaros ŝin, ke ŝi ne trovos
siajn vojojn. 7 Ŝi postkuros siajn amistojn, sed ŝi ne
kuratingos ilin; ŝi serĉos ilin, sed ne trovos; kaj ŝi
diros: Mi iros returne al mia unua edzo, ĉar pli bone
estis al mi tiam, ol nun. 8 Kaj ŝi ne sciis, ke Mi estis
tiu, kiu donadis al ŝi panon kaj moston kaj oleon, Mi
donis al ŝi multe da arĝento kaj oro, kiun ili uzis por
Baal. 9 Tial Mi prenos returne Mian panon kaj Mian
moston iliatempe, Mi forprenos Mian lanaĵon kaj Mian
linaĵon, per kiu ŝi kovris sian nudecon. 10 Kaj nun
Mi malkaŝos ŝian hontindaĵon antaŭ la okuloj de ŝiaj
amistoj, kaj neniu savos ŝin el Mia mano. 11 Mi ĉesigos
ĉian ŝian gajecon, ŝiajn festojn, monatkomencojn, kaj
sabatojn, kaj ĉiujn ŝiajn solenajn kunvenojn. 12 Mi
dezertigos ŝiajn vinbertrunkojn kaj ŝiajn figarbojn,
pri kiuj ŝi diras: Tio estas donaco, kiun donis al mi
miaj amistoj; Mi faros ilin arbaro, kaj la bestoj de la
kampo ilin manĝos. 13 Mi punos ŝin pro la tagoj de
la Baaloj, al kiuj ŝi incensis, ornaminte sin per siaj
ringoj kaj siaj ĉirkaŭkoloj, kaj sekvante siajn amistojn,
dum Min ŝi forgesis, diras la Eternulo. 14 Tial jen Mi
allogos ŝin, kondukos ŝin en dezerton, kaj parolos
al ŝi agrablajn vortojn; 15 kaj Mi donos al ŝi ŝiajn
vinberĝardenojn el tie, kaj la valon de malĝojo Mi
faros pordo de espero; kaj tie ŝi kantos, kiel en la tagoj
de sia juneco kaj kiel en la tempo de sia elirado el
la lando Egipta. 16 En tiu tempo, diras la Eternulo,
ŝi nomos Min: Mia edzo; ŝi ne plu nomos Min: Mia
mastro. 17 Mi forigos de ŝia buŝo la nomojn de la
Baaloj, kaj oni ne plu rememoros ilin laŭ ilia nomo.
18 Kaj Mi faros por ili en tiu tempo interligon kun
la bestoj de la kampo, kun la birdoj de la ĉielo, kaj
kun la rampaĵoj de la tero; pafarkon, glavon, kaj
militon Mi ekstermos el la lando, kaj Mi donos al ili la
eblon dormi eksterdanĝere. 19 Mi fianĉiĝos kun vi
por ĉiam, Mi fianĉiĝos kun vi en vero kaj justo, en
favorkoreco kaj kompatemeco. 20 Mi fianĉiĝos kun
vi en fideleco, kaj vi ekkonos la Eternulon. 21 En tiu
tempo Mi favoros, diras la Eternulo, Mi favoros la
ĉielon, kaj ĝi favoros la teron; 22 kaj la tero favoros la
grenon, moston, kaj oleon, kaj ĉi tiuj favoros Jizreelon.
23 Mi faros ŝin al Mi fruktoporta sur la tero, kaj Mi
kompatos la nekompatitinon; kaj al tiu, kiu estis ne
Mia popolo, Mi diros: Vi estas Mia popolo; kaj ĝi diros:
Vi estas mia Dio.

3 Kaj la Eternulo diris al mi plue: Iru, kaj komencu
amaĵon kun virino, kiun amas ŝia edzo, sed

kiu adultas, simile al tio, kiel la Eternulo amas la
Izraelidojn, sed ili turnas sin al aliaj dioj kaj amas
iliajn vinberkukojn. 2 Kaj mi akiris ŝin al mi per
dek kvin arĝentaj moneroj kaj ĥomero kaj duono da
hordeo. 3 Kaj mi diris al ŝi: Longan tempon restu
ĉe mi; ne malĉastu, kaj fordonu vin al neniu viro;
tiel same mi agos kun vi. 4 Ĉar dum longa tempo
la Izraelidoj restos sen reĝo, sen estro, sen oferoj,
sen statuo, sen efodo, kaj sen domaj dioj; 5 poste la
Izraelidoj returnos sin, kaj serĉos la Eternulon, sian
Dion, kaj Davidon, sian reĝon, kaj ili respektegos la
Eternulon kaj Lian bonon en la fina tempo.

4 Aŭskultu la vorton de la Eternulo, ho Izraelidoj; ĉar
la Eternulo havas juĝan disputon kun la loĝantoj de
la tero; ĉar sur la tero ne ekzistas vero, nek amo, nek
konado de Dio. 2 Malbenado kaj trompado, mortigado,
ŝtelado, kaj adultado tre disvastiĝis, kaj sangoverŝo
sekvas sangoverŝon. 3 Pro tio ekploros la tero, kaj
malfeliĉo trafos ĉiujn ĝiajn loĝantojn kaj la bestojn de
la kampo kaj la birdojn de la ĉielo; eĉ la fiŝoj de la
maro malaperos. 4 Sed neniu malpacu, neniu riproĉu;
via popolo estas kiel insultantoj de pastro. 5 Vi falos
meze de la tago, kaj ankaŭ la profeto falos kun vi
en la nokto; kaj Mi pereigos vian patrinon. 6 Mia
popolo pereos pro tio, ke ĝi ne havas scion. Ĉar vi
forpuŝis la scion, tial Mi vin forpuŝos, ke vi ne plu
estu Mia pastro. Ĉar vi forgesis la instruon de via
Dio, tial ankaŭ Mi forgesos viajn infanojn. 7 Ju pli ili
multiĝas, des pli ili pekas kontraŭ Mi; ilian honoron
Mi faros senhonoreco. 8 Per la pekoj de Mia popolo ili
sin nutras, kaj al ĝia malpieco strebas ilia animo. 9
Kaj fariĝos al la popolo tiel same, kiel al la pastroj: Mi
punos ĝin pro ĝia konduto, kaj Mi repagos al ĝi pro
ĝiaj agoj. 10 Ili manĝos kaj ne satiĝos, ili malĉastos
kaj ne disvastiĝos; ĉar ili forlasis la Eternulon kaj ne
atentas Lin. 11 Malĉastado, vino, kaj mosto forprenas
la prudenton. 12 Mia popolo demandas sian lignon,
kaj ĝia bastono donas al ĝi respondon; ĉar la spirito
de malĉasteco erarigas ilin, kaj ili malĉastas kontraŭ
sia Dio. 13 Sur la supro de montoj ili alportas oferojn,
kaj sur montetoj ili incensas sub kverko, poplo, kaj
terebintarbo, ĉar bona estas ilia ombro. Tial malĉastos
viaj filinoj, kaj viaj bofilinoj adultos. 14 Ĉu Mi povas
ne puni viajn filinojn, se ili malĉastas, kaj viajn
bofilinojn, se ili adultas, se ili apartiĝas kune kun
la malĉastistinoj kaj alportas oferojn kune kun la
publikaj virinoj, kaj la malklera popolo pereas? 15
Se malĉastas vi, ho Izrael, tiam almenaŭ Jehuda ne
kulpiĝu; ne iru en Gilgalon, ne iru en Bet-Avenon, kaj
ne ĵuru: Kiel vivas la Eternulo. 16 Ĉar Izrael obstinas,
kiel obstina bovino; ĉu nun la Eternulo povas paŝti
ilin, kiel ŝafidon sur vasta paŝtejo? 17 Efraim aliĝis al
idoloj; lasu lin. 18 Abomeninda fariĝis ilia drinkado; ili
fordonis sin al malĉastado kaj malhonora amo; honto
al iliaj protektantoj. 19 La vento forportos ilin per siaj
flugiloj, kaj ili hontos pri siaj oferoj.

5 Aŭskultu tion, ho pastroj, atentu, ho domo de
Izrael, kaj prenu en viajn orelojn, ho reĝa domo;
ĉar vin trafos juĝo pro tio, ke vi estis kaptilo en
Micpa kaj etendita reto sur Tabor. 2 Per premado ili
profundigis la pekojn; Mi punos ĉiujn. 3 Mi konas
Efraimon, kaj Izrael ne estas kaŝita antaŭ Mi: vi nun
malĉastas, ho Efraim, kaj Izrael malpuriĝis. 4 Iliaj agoj
ne permesas al ili reveni al ilia Dio, ĉar spirito de
malĉasteco estas en ili kaj la Eternulon ili ne konas. 5
La malmodesteco de Izrael parolas kontraŭ li antaŭ lia
vizaĝo; tial Izrael kaj Efraim falos pro siaj malbonagoj;
ankaŭ Jehuda falos kun ili. 6 Kun siaj ŝafoj kaj bovoj
ili iros serĉi la Eternulon, sed ne trovos; Li foriĝis de
ili. 7 Ili perfidis al la Eternulo, kaj naskis fremdajn
infanojn; tial ekstermos ilin la monato kune kun ilia
havaĵo. 8 Blovu per korno en Gibea, per trumpeto
en Rama; bruu en Bet-Aven, post vi, ho Benjamen! 9
Efraim fariĝos dezerto en la tago de la puno; inter
la triboj de Izrael Mi avertis fidele. 10 La princoj
de Jehuda fariĝis similaj al forŝovantoj de limo; Mi
elverŝos sur ilin Mian koleron kiel akvon. 11 Efraim
estas premata, frapita de la juĝo; ĉar li memvole sekvis
homan ordonon. 12 Mi estos por Efraim kiel tineo,
kiel putro por la domo de Jehuda. 13 Efraim vidis sian
malsanon, kaj Jehuda sian vundon; tiam Efraim iris al
Asirio, kaj sendis al reĝo, kiu venĝus pro li; sed li ne
povas sanigi vin, ne forigos de vi la vundon. 14 Ĉar Mi
estas kiel leono por Efraim, kiel leonido por la domo
de Jehuda; Mi, Mi disŝiros kaj foriros; Mi forportos, kaj
neniu povos savi. 15 Mi iros returne sur Mian lokon,
ĝis ili konfesos sian kulpon kaj serĉos Mian vizaĝon;
kiam ili suferos, ili Min serĉos, kaj diros:

6 Ni iru, ni revenu al la Eternulo; ĉar Li disŝiris,
sed Li ankaŭ resanigos nin, Li frapis, kaj Li ankaŭ
bandaĝos niajn vundojn. 2 Li revivigos nin post du
tagoj; en la tria tago Li restarigos nin, kaj ni vivos

antaŭ Li. 3 Kaj ni havos scion, kaj ni penos koni la
Eternulon. Li eliros, kiel bela matenruĝo; Li venos al
ni, kiel pluvo, kiel printempa pluvo, kiu malsekigas la
teron. 4 Kion Mi faru al vi, ho Efraim? Kion Mi faru al
vi, ho Jehuda? Via pieco estas kiel matena nebulo, kaj
kiel roso, kiu frue malaperas. 5 Tial Mi hakas per la
profetoj, Mi mortigas ilin per la vortoj el Mia buŝo; kaj
justeco koncerne vin eliros kiel lumo. 6 Ĉar Mi deziras
bonfaradon, sed ne oferon, kaj konadon de Dio Mi
preferas ol bruloferojn. 7 Sed ili rompis la interligon,
kiel Adam, kaj ili defalis de Mi. 8 Gilead estas urbo de
malbonaguloj, makulita de sango. 9 Kiel bando da
embuskantoj la anaro de la pastroj pereigas tiujn, kiuj
iras al Ŝeĥem; abomenindaĵon ili faras. 10 En la domo
de Izrael Mi vidas teruraĵon: tie malĉastas Efraim,
malpuriĝas Izrael. 11 Sed ankaŭ Jehuda havos rikolton,
kiam Mi revenigos la forkaptitojn de Mia popolo.

**7** Kiam Mi komencis kuraci Izraelon, malkaŝiĝis la
malbonagoj de Efraim kaj la malboneco de Samario;
ĉar ili agas mensoge, ŝtelistoj eniras, kaj bandoj rabas
sur la strato. 2 Ili ne pensis en sia koro, ke Mi memoras
ĉiujn iliajn malbonagojn; nun ĉirkaŭas ilin iliaj agoj
kaj staras antaŭ Mia vizaĝo. 3 Per sia malboneco ili
gajigas la reĝon kaj per siaj trompoj la princojn. 4 Ĉiuj
ili adultas, kiel forno, forte hejtita de la bakisto, kiu
ĉesas hejti nur de post la knedado de sia pasto ĝis
ĝia fermentiĝo. 5 Hodiaŭ estas festo de nia reĝo; kaj
la princoj komencas fariĝi frenezaj de la vino, kaj li
etendas sian manon kun la blasfemantoj. 6 Ili armas
sian koron per malico, kiel fornon, kaj kvankam la
bakisto dormas dum la tuta nokto, ĝi tamen matene
brulas kiel flamanta fajro. 7 Ĉiuj ili ardas, kiel forno,
kaj formanĝas siajn juĝistojn; ĉiuj iliaj reĝoj falis,
kaj neniu el ili vokas al Mi. 8 Efraim miksis sin kun
la popoloj, Efraim fariĝis kiel platkuko, bakita sen
renversado. 9 Fremduloj konsumis liajn fortojn, kaj li
ne rimarkis; eĉ grizaj haroj lin kovris, kaj li tion ne
scias. 10 La malmodesteco de Izrael atestas kontraŭ
li, sed ili ne turnas sin al la Eternulo, sia Dio, kaj ne
serĉas Lin malgraŭ ĉio. 11 Efraim fariĝis kiel naiva,
senprudenta kolombo: ili vokas la Egiptojn, ili iras en
Asirion. 12 Kiam ili iros, Mi ĵetos sur ilin Mian reton;
kiel birdojn de la ĉielo Mi tiros ilin malsupren; Mi
ilin punos, kiel estis predikate en iliaj kunvenoj. 13
Ve al ili, ke ili foriĝis de Mi; malfeliĉaj ili estas, ke ili
defalis de Mi. Mi volas savi ilin, kaj ili parolas kontraŭ
Mi mensogojn. 14 Kaj ili ne vokas al Mi en sia koro,
kiam ili ĝemas sur siaj litoj; pro pano kaj mosto ili
kunvenas, sed de Mi ili foriĝas. 15 Mi instruis ilin,
fortigis ilian brakon, kaj ili pensas malbonon pri Mi.
16 Ili returnas sin, sed ne al la Plejaltulo; ili fariĝis kiel
malĝusta pafarko; falos de glavo iliaj estroj pro sia
kolerema lango; tio estos moko kontraŭ ili en la lando
Egipta.

**8** Metu trumpeton al via buŝo! Li flugas kiel aglo al
la domo de la Eternulo, pro tio, ke ili agis kontraŭ
Mia interligo kaj defalis de Mia instruo. 2 Al Mi ili
vokos: Ho mia Dio, ni, Izraelidoj, ekkonis Vin. 3 Izrael
forpuŝis la bonon; malamiko lin persekutos. 4 Ili
starigis reĝojn, sed ne de Mi; ili starigis princojn,
sed sen Mia scio; el sia arĝento kaj oro ili faris al si
idolojn, por pereigi sin. 5 Forpuŝita estas via bovido,
ho Samario; ekflamis kontraŭ ili Mia kolero; kiel
longe ankoraŭ ili ne povos puriĝi? 6 Ĉar ĝi estas
faritaĵo de Izrael; artisto ĝin faris, kaj ĝi ne estas dio;
dispecetiĝos la bovido de Samario. 7 Ĉar ili semas
venton, ili rikoltos ventegon; grenon li ne havos;
la kreskantaĵo ne donos farunon; se ĝi eĉ donos,
fremduloj ĝin formanĝos. 8 Izrael estas formanĝata;
nun ili fariĝis inter la popoloj kiel senvalora vazo. 9
Ĉar ili iris en Asirion, kiel sovaĝa azeno solece vaganta;
la Efraimidoj donis amajn donacojn. 10 Kvankam ili
donis donacojn al la nacioj, Mi nun kolektus ilin,
por ke ili iom ripozu de la ŝarĝo de la reĝo de la
princoj. 11 Sed multe da altaroj konstruis Efraim, por
peki; ili fariĝis por li altaroj pekigaj. 12 Mi skribis
por li la multon de Miaj leĝoj; sed li rigardas ilin
kiel fremdaĵon. 13 La oferojn, donacatajn al Mi, ili
buĉas nur pro viando, por ĝin manĝi; la Eternulo ne
deziras ilin; nun Li rememoros iliajn malbonagojn
kaj punos iliajn pekojn; ili revenos en Egiptujon. 14
Izrael forgesis sian Kreinton, kaj konstruas palacojn;
Jehuda konstruis multe da fortikigitaj urboj; sed Mi
sendos fajron sur liajn urbojn, kaj ĝi ekstermos liajn
palacojn.

**9** Ne ĝoju, ho Izrael, ne estu gaja, kiel la popoloj,
ĉar vi malĉaste foriĝis de via Dio, vi preferas
proamaĵajn donacojn ol ĉiujn grenejojn plenajn de
greno. 2 Tial draŝejo kaj vinpremejo ne nutros ilin, la
mosto mankos en ĝi. 3 Ili ne loĝos en la lando de la
Eternulo; Efraim revenos en Egiptujon, kaj en Asirio ili
manĝos malpuraĵon. 4 Ili ne verŝoferos al la Eternulo

vinon, kaj ne estos agrablaj al Li; iliaj oferoj estos
kiel pano de suferantoj: ĉiuj ĝiaj manĝantoj fariĝos
malpuraj; ĉar ilia pano devas esti nur por ili mem,
ĝi ne devas veni en la domon de la Eternulo. 5 Kion
vi faros en la tago de solena kunveno kaj en la tago
de festo de la Eternulo? 6 Ĉar vidu, ili forkuras de
malfeliĉo; Egiptujo ilin kolektos, Memfis ilin enterigos;
sur la loko, kie troviĝis iliaj amataj arĝentaĵoj, kreskos
urtiko, dornoj estos en iliaj tendoj. 7 Venis la tempo
de punvizito, venis la tagoj de repago; Izrael ekscios,
ĉu malsaĝa estis la profeto, ĉu freneza estis la viro
inspirita, parolante pri viaj multaj malbonagoj kaj pri
la granda malboneco. 8 La gardisto de Efraim estis
antaŭe kun mia Dio; nun profeto metas kaptilojn sur
ĉiuj liaj vojoj, kaj malamo estas en la domo de lia Dio.
9 Profunde ili malboniĝis, kiel en la tagoj de Gibea; Li
rememoros iliajn malbonagojn, Li punos iliajn pekojn.
10 Kiel vinberojn en la dezerto Mi trovis Izraelon;
kiel unuan frukton sur la figarbo en la komenco
de ĝia matureco Mi vidis viajn patrojn; sed ili iris
al Baal-Peor, kaj konsekris sin al la hontindaĵo, kaj
fariĝis abomeninduloj, kiel ilia amato. 11 La honoro
de Efraim forflugos kiel birdo; ne estos nasko, nek
gravedeco, nek gravediĝo. 12 Kaj se ili eĉ edukus siajn
infanojn, Mi tamen seninfanigos ilin, ke ili ne havu
homojn; ĉar ve al ili, kiam Mi forigos Min de ili. 13
Efraim, kiel Mi vidas, estas plantita sur bela loko,
kiel Tiro; tamen Efraim elirigos siajn infanojn al la
mortiganto. 14 Donu al ili, ho Eternulo, tion, kion
Vi promesis doni; donu al ili ventron aborteman kaj
mamojn sekiĝintajn. 15 Ilia tuta malboneco estas en
Gilgal; tie Mi ekmalamis ilin; pro iliaj malbonaj agoj
Mi elpelos ilin el Mia domo; Mi ne plu amos ilin; ĉiuj
iliaj princoj estas defalintoj. 16 Efraim estas batita;
ilia radiko sekiĝis; ili ne plu donos fruktojn; eĉ se ili
naskos, Mi mortigos la karan frukton de ilia ventro.
17 Mia Dio ilin forpuŝos, ĉar ili ne aŭskultis Lin; kaj ili
vagados inter la nacioj.

**10** Izrael estas vasta vinberujo, portas siajn fruktojn;
sed ju pli multiĝis liaj fruktoj, des pli li multigis
siajn altarojn; ju pli bona estis lia lando, des pli belajn
statuojn li starigis. 2 Ilia koro estas dividita, tial nun ili
estas kondamnitaj; Li rompos iliajn altarojn, frakasos
iliajn statuojn. 3 Nun ili diras: Ni ne havas reĝon; ĉar
ni ne timas la Eternulon, kion do povas fari por ni
reĝo? 4 Ili parolas vanajn vortojn, ĵuras mensoge,
kiam ili faras interligon; tial juĝo super ili aperos,
kiel venena herbo sur la sulkoj de la kampo. 5 Pri la
bovidoj de Bet-Aven ektremos la loĝantoj de Samario;
ĉar ĝia popolo ekploros pri ĝi, kaj la pastraĉoj, kiuj
ĝojis pri ĝi, ploros pri ĝia gloro, kiu foriĝis de ĝi. 6 La
bovido mem estas forportita en Asirion, kiel donaco
al la reĝo-venĝonto; malhonoron ricevos Efraim, kaj
Izrael hontos pro sia entrepreno. 7 Malaperos Samario
kun sia reĝo, kiel ŝaŭmo sur la supraĵo de akvo. 8
Detruitaj estos la altaĵoj de Aven, la peko de Izrael;
kardo kaj dornoj kreskos sur iliaj altaroj; ili diros al la
montoj: Kovru nin; kaj al la montetoj: Falu sur nin. 9
Pli ol en la tempo de Gibea vi pekis, ho Izrael; tiam
oni leviĝis, sed nun milito en Gibea ne atingas la
malbonagulojn. 10 Konforme al Mia intenco Mi punos
ilin, kaj kolektiĝos kontraŭ ili popoloj, kiam ili estos
punataj pro siaj du krimoj. 11 Efraim estas kiel bovido
dresita, amanta draŝi. Mi metos jugon sur lian belan
kolon, Mi rajdos sur Efraim, Jehuda plugos, Jakob
erpos. 12 Semu al vi justecon, tiam vi rikoltos amon;
plugu al vi plugotaĵon; estas tempo, por turni sin al
la Eternulo, ĝis Li venos kaj verŝos sur vin justecon.
13 Vi plugas malpiaĵon, vi rikoltas malbonagojn, vi
manĝas frukton de mensogo; ĉar vi fidas vian vojon,
la multon de viaj herooj. 14 Sed fariĝos tumulto en
via popolo, kaj ĉiuj viaj fortikaĵoj estos detruitaj, kiel
Ŝalman detruis Bet-Arbelon dum la milito; mortigita
estos la patrino kune kun siaj infanoj. 15 Tion faros al
vi Bet-El pro via granda malpieco. Frue pereos, pereos
la reĝo de Izrael.

**11** Kiam Izrael estis junulo, Mi lin ekamis, kaj el
Egiptujo Mi vokis Mian filon. 2 Sed nun oni vokas
ilin, kaj ili sin deturnas; al la Baaloj ili oferas, kaj al
idoloj ili incensas. 3 Mi instruis al Efraim la iradon;
Mi prenis ilin je la brako, kaj ili ne rimarkis, ke Mi
ilin kuracas. 4 Per ŝnuroj de homoj Mi tiris ilin, per
ligiloj de amo; Mi estis por ili kiel levanto de la jugo,
kaj Mi metis antaŭ ili la manĝaĵon. 5 Ili ne revenos
en la landon Egiptan, sed Asirio estos ilia reĝo, ĉar
ili ne volis penti. 6 Glavo falos sur liajn urbojn kaj
ekstermos liajn idojn kaj formanĝos ilin pro iliaj
entreprenoj. 7 Mia popolo rigidiĝis en la defalo de Mi;
kaj kvankam oni ĝin vokas al la Plejaltulo, ĝi ne levas
sin. 8 Kiel Mi agu kun vi, ho Efraim? kiel Mi protektu
vin, ho Izrael? Ĉu Mi faru al vi, kiel al Adma? ĉu Mi
egaligu vin al Ceboim? Renversiĝis en Mi Mia koro,

varmegiĝis Mia tuta kompato. 9 Mi ne agos laŭ Mia
flama kolero, Mi ne plu ekstermos Efraimon; ĉar Mi
estas Dio, ne homo, Mi estas Sanktulo inter vi; Mi
ne venos en furiozo. 10 La Eternulon ili sekvos, kiel
kriantan leonon; kiam Li krios, tiam timigite venos
la filoj de okcidente. 11 Timigite kiel birdo ili venos
el Egiptujo, kaj kiel kolombo el la lando Asiria; kaj
Mi enloĝigos ilin en iliaj domoj, diras la Eternulo. 12
Kun mensogoj ĉirkaŭis Min Efraim, kaj kun falsaĵo la
domo de Izrael; sed Jehuda ankoraŭ tenis sin je Dio
kaj estis fidela al la Sanktulo.

**12** Efraim paŝtas venton, postkuras la orientan
venton; kun ĉiu tago li faras pli da mensogaĵoj
kaj da idolaĵoj; li faras interligon kun Asirio, kaj
portas oleon en Egiptujon. 2 Sed ankaŭ kun Jehuda la
Eternulo havas juĝon, kaj Li punos Jakobon laŭ lia
konduto, laŭ liaj agoj Li repagos al li. 3 Ankoraŭ en
la ventro li retenis sian fraton, kaj viriĝinte li luktis
kun Dio. 4 Li luktis kun anĝelo kaj venkis, li tamen
petegis lin kun ploro; en Bet-El Li nin trovos, kaj tie
Li parolos kun ni. 5 La Eternulo estas Dio Cebaot,
Eternulo estas Lia nomo. 6 Returnu do vin al via Dio,
konservu favorkorecon kaj justecon, kaj fidu ĉiam
vian Dion. 7 Kanaanido havas en sia mano falsan
pesilon, li amas trompi; 8 kaj Efraim diras: Mi riĉiĝis,
mi akiris al mi havaĵon, sed en ĉiuj miaj laboroj oni ne
trovos ĉe mi malbonagon, per kiu mi estus pekinta. 9
Mi, la Eternulo, estas via Dio de post la lando Egipta;
Mi ankoraŭ denove loĝigos vin en tendoj, kiel en la
tagoj de festo. 10 Mi parolis per la profetoj, Mi donis
multe da vizioj, kaj per la profetoj Mi parolis alegorie.
11 En Gilead estis idoloj, sed ili fariĝis senvaloraĵo; en
Gilgal oni oferbuĉis bovojn, sed iliaj altaroj fariĝis
kiel ŝtonamasoj sur la sulko de la kampo. 12 Jakob
forkuris sur la kampojn de Sirio, Izrael servis por
edzino, kaj por edzino li devis gardi. 13 Kaj per profeto
la Eternulo elkondukis Izraelon el Egiptujo, kaj per
profeto Li gardis lin. 14 Forte kolerigis Lin Efraim, tial
lia sango venos sur lin, kaj lia Sinjoro redonos al li
pro liaj hontindaĵoj.

**13** Kiam Efraim parolis, oni timis; li altiĝis en Izrael.
Sed li fariĝis kulpa per Baal, kaj mortis. 2 Nun ili
ankoraŭ pli pekas; ili faris al si el sia arĝento statuojn,
idolojn laŭ sia kompreno, kiuj estas ja ĉiuj faritaĵo
de forĝistoj; ili parolas pri ili: Tiuj, kiuj oferbuĉas
homojn, povas kisi la bovidojn. 3 Pro tio ili estos
kiel matena nebulo, kiel roso, kiu frue malaperas,
kiel grenventumaĵo, kiun la vento forblovas de la
draŝejo, kaj kiel fumo el la kamentubo. 4 Sed Mi, la
Eternulo, estas via Dio de post la lando Egipta; kaj
alian Dion krom Mi vi ne devas koni, kaj ne ekzistas
alia Savanto krom Mi. 5 Mi konis vin en la dezerto,
en la lando de sekeco. 6 Kiam ili havis paŝtejon, ili
satiĝis; kaj kiam ili satiĝis, tiam fieriĝis ilia koro, kaj
tial ili forgesis Min. 7 Tial Mi estos por ili kiel leono,
kiel leopardo, kiu embuskas ĉe la vojo. 8 Mi atakos
ilin, kiel ursino, kiu perdis la infanojn, Mi disŝiros
ilian ŝlositan koron, Mi manĝegos ilin tie, kiel leono;
sovaĝaj bestoj ilin disŝiros. 9 Vi pereigis vin, ho Izrael,
ĉar via savo estas nur en Mi. 10 Kie estas via reĝo?
li savu vin en ĉiuj viaj urboj. Kie estas viaj juĝistoj,
pri kiuj vi diris: Donu al mi reĝon kaj estrojn? 11 Mi
donis al vi reĝon en Mia kolero, kaj Mi forprenos lin
en Mia indigno. 12 Kunpakitaj estas la malbonagoj
de Efraim, lia peko estas konservita. 13 Doloroj de
naskantino atakos lin. Li estas infano sensaĝa; alie li
ne starus longe en la pozicio de naskiĝantaj infanoj. 14
El Ŝeol Mi savos ilin, de la morto Mi liberigos ilin; kie
estas via veneno, ho morto? kie estas via pereigeco,
ho Ŝeol? Sed la konsolo estas ankoraŭ kaŝita antaŭ
Miaj okuloj. (Sheol h7585) 15 Kvankam li estas fruktoriĉa
inter la fratoj, venos tamen vento orienta, vento de la
Eternulo, blovanta el la dezerto, kaj tiam elsekiĝos
lia fonto, dezertiĝos lia devenejo; kaj li disrabos la
trezorejon de ĉiuj grandvaloraĵoj. 16 Samario suferos,
ĉar ĝi ribelis kontraŭ sia Dio. De glavo ili falos; iliaj
malgrandaj infanoj estos frakasitaj, iliaj gravedulinoj
estos dishakitaj.

**14** Revenu, ho Izrael, al la Eternulo, via Dio; ĉar vi
falis pro viaj malbonagoj. 2 Prenu kun vi vortojn
kaj revenu al la Eternulo; diru al Li: Pardonu ĉiun
pekon kaj akceptu bonon; anstataŭ bovoj ni alportos
ofere niajn lipojn. 3 Asirio ne savos nin; ni ne rajdos
sur ĉevaloj, ni ne plu nomos nia dio la faritaĵon de
niaj manoj; nur ĉe Vi la orfo trovas kompaton. 4 Mi
sanigos ilin de la defalo, Mi volonte ilin amos, ĉar
pasis Mia kolero koncerne ilin. 5 Mi estos por Izrael
kiel roso; li ekfloros kiel rozo, li profundigos siajn
radikojn kiel Lebanon. 6 Liaj branĉoj disvastiĝos, li
estos bela kiel olivarbo, li bonodoros kiel Lebanon. 7
Revenos tiuj, kiuj sidis en lia ombro; ili reviviĝos kiel
greno, ili floros kiel vinberbranĉo; li estos fama, kiel

la vino de Lebanon. **8** Ho Efraim, per kio interesas
Min plue la idoloj? Mi aŭskultos lin kaj gvidos lin;
Mi estos kiel verda cipreso; ĉe Mi oni trovos viajn
fruktojn. **9** Kiu estas saĝa, tiu komprenu ĉi tion; kiu
estas prudenta, tiu sciu ĉi tion; ĉar ĝustaj estas la
vojoj de la Eternulo, virtuloj iras sur ili, kaj malpiuloj
falas sur ili.

# Joel

1 Vorto de la Eternulo, kiu aperis al Joel, filo de
Petuel. 2 Aŭskultu ĉi tion, ho maljunuloj, kaj atentu,
ho ĉiuj loĝantoj de la lando! Ĉu estis ĉi tio en via
tempo, aŭ en la tempo de viaj patroj? 3 Rakontu pri
tio al viaj infanoj, kaj viaj infanoj al siaj infanoj, kaj
iliaj infanoj al la sekvanta generacio. 4 Kio restis de la
raŭpoj, tion manĝis la akridoj; kio restis de la akridoj,
tion manĝis la skaraboj; kaj kio restis de la skaraboj,
tion manĝis la vermoj. 5 Vekiĝu, ho ebriuloj, kaj
ploru, ĝemu vi, ĉiuj drinkantoj, pri la suko vinbera,
kiu estas prenita for de via buŝo. 6 Ĉar venis sur mian
landon nacio forta kaj nekalkulebla; ĝiaj dentoj estas
dentoj de leono, kaj makzelojn de leonino ĝi havas.
7 Ĝi dezertigis mian vinberujon, ĉirkaŭŝiris mian
figarbon, tute senŝeligis ĝin kaj forĵetis; blankiĝis
ĝiaj branĉoj. 8 Ĝemu, kiel junulino, kiu metis sur
sin sakaĵon pro sia fianĉo. 9 For estas la farunoferoj
kaj verŝoferoj el la domo de la Eternulo; funebras la
pastroj, servistoj de la Eternulo. 10 Dezertigita estas la
kampo, funebras la tero; ĉar ekstermita estas la greno,
elsekiĝis la mosto, velkis la olivoj. 11 Konsternitaj
estas la plugistoj, plorĝemas la vinberkultivistoj, pro
la tritiko kaj hordeo, pro la pereo de la rikolto sur la
kampo. 12 Elsekiĝis la vinberbranĉo, velkis la figarbo;
la granatarbo, la palmo, kaj la pomarbo, ĉiuj arboj de
la kampo elsekiĝis; malaperis gajeco ĉe la homoj. 13
Zonu vin kaj ploru, ho pastroj; ĝemegu, ho servistoj de
la altaro; iru kaj kuŝu en sakaĵoj, ho servistoj de mia
Dio; ĉar malaperis el la domo de via Dio la farunoferoj
kaj verŝoferoj. 14 Sanktigu faston, proklamu solenan
kunvenon, kunvoku la maljunulojn kaj ĉiujn loĝantojn
de la lando en la domon de la Eternulo, via Dio, kaj
kriu al la Eternulo: 15 Ho ve, kia tago! Ĉar proksima
estas la tago de la Eternulo; kiel katastrofo ĝi venos
de la Plejpotenculo. 16 Antaŭ niaj okuloj ja malaperis
la manĝaĵo, el la domo de nia Dio la ĝojo kaj gajeco.
17 Forputris la grajnoj sub siaj terbuloj, malpleniĝis
la grenejoj, detruitaj estas la garbejoj, ĉar la greno
difektiĝis. 18 Ho, kiel ĝemas la brutoj, kiel suferas la
bovaroj! ĉar ili ne havas paŝtaĵon; ankaŭ la ŝafaroj
turmentiĝas. 19 Al Vi, ho Eternulo, mi vokas; ĉar
fajro ekstermis la herbejojn de la stepo, kaj flamo
bruldifektis ĉiujn arbojn de la kampo. 20 Eĉ la bestoj
de la kampo sopiras al Vi; ĉar elsekiĝis la torentoj da
akvo, kaj fajro ekstermis la herbejojn de la stepo.

2 Blovu per korno en Cion, kaj kriu alarmon sur Mia
sankta monto; ektremu ĉiuj loĝantoj de la lando;
ĉar venas la tago de la Eternulo, ĝi estas jam proksima;
2 tago de mallumo kaj senlumeco, tago de nuboj kaj
nebulo; simile al la matena ĉielruĝo disvastiĝas sur la
montoj popolo grandnombra kaj forta; tia neniam
ekzistis ĝis nun, kaj ankaŭ post ĝi ne plu ekzistos tia,
en iu ajn generacio. 3 Antaŭ ĝi ekstermas fajro, kaj
post ĝi bruligas flamo; antaŭ ĝi la lando estas kiel
la Edena ĝardeno, kaj post ĝi absoluta dezerto; kaj
neniu saviĝos de ĝi. 4 Ili aspektas kiel ĉevaloj, ili kuras
kiel rajdantoj. 5 Ili saltas sur la montoj, kiel bruantaj
ĉaroj, kiel krakado de fajro, kiam ĝi ekstermas pajlon,
kiel popolo potenca, pretiĝinta por batalo. 6 Popoloj
tremas antaŭ ĝi, ĉiuj vizaĝoj paliĝas. 7 Kiel herooj
ili kuras, kiel kuraĝaj batalistoj ili grimpas sur la
muregon; ĉiu iras sian vojon, ne foreraras de sia
vojo. 8 Unu alian ne puŝas, ĉiu iras en sia vico; sur
la glavojn ili sin ĵetas, sed restas sendifektaj. 9 Ili
trakuras la urbon, kuras sur la muregoj, eniras en
la domojn, grimpas tra la fenestroj, kiel ŝtelisto. 10
Antaŭ ili skuiĝas la tero, tremas la ĉielo; la suno kaj
la luno senlumiĝas, kaj la steloj perdas sian brilon.
11 Kaj la Eternulo ektondras per Sia voĉo antaŭ Sia
armeo; ĉar Lia militistaro estas tre granda, kaj la
plenumantoj de Lia vorto estas potencaj; ĉar granda
kaj tre timinda estos la tago de la Eternulo; kiu povos
ĝin elteni? 12 Sed eĉ nun ankoraŭ la Eternulo diras:
Returnu vin al Mi per via tuta koro, kun fastado,
plorado, kaj ĝemegado; 13 disŝiru vian koron, ne viajn
vestojn, kaj returnu vin al la Eternulo, via Dio; ĉar Li
estas favorkora kaj kompatema, longepacienca kaj
indulgema, kaj Li bedaŭras malfeliĉon. 14 Kiu scias?
eble Li denove bedaŭros, eble Li restigos post Si benon,
farunoferojn kaj verŝoferojn al la Eternulo, via Dio. 15
Blovu per korno en Cion, sanktigu faston, proklamu
solenan kunvenon. 16 Kunvenigu la popolon, sanktigu
la komunumon, invitu la maljunulojn, kolektu la
malgrandajn infanojn kaj suĉinfanojn; fianĉo eliru el
sia ĉambro, kaj fianĉino el sub sia baldakeno. 17 Inter
la portiko kaj la altaro ploru la pastroj, servistoj de
la Eternulo, kaj ili diru: Indulgu, ho Eternulo, Vian
popolon, kaj ne kovru per honto Vian heredaĵon, la
nacioj ne moku ilin; por kio oni diru inter la popoloj:
Kie estas ilia Dio? 18 Tiam la Eternulo fariĝos fervora
por Sia lando kaj indulgos Sian popolon. 19 Kaj la
Eternulo respondos kaj diros al Sia popolo: Jen Mi

sendas al vi grenon kaj moston kaj oleon, kaj vi satiĝu
per ili; kaj Mi ne plu permesos al la nacioj malhonori
vin. 20 Kaj la nordulon Mi malproksimigos de vi,
kaj forpelos lin en landon senakvan kaj dezertan,
lian antaŭan parton al la maro orienta, kaj lian
malantaŭan parton al la maro okcidenta; kaj li putros
kaj malbonodoros, ĉar li faris multe da malbono. 21 Ne
timu, ho tero, ĝoju kaj estu gaja, ĉar la Eternulo faros
ion grandan. 22 Ne timu, ho bestoj de la kampo, ĉar
verdiĝos la paŝtejoj de la stepoj; la arboj portos siajn
fruktojn, la figarbo kaj vinberujo donos sian riĉaĵon.
23 Kaj vi, ho infanoj de Cion, ĝoju kaj estu gajaj pri la
Eternulo, via Dio; ĉar Li donos al vi instruanton pri
virteco, kaj Li sendos al vi pluvon, fruan kaj malfruan,
kiel antaŭe. 24 La grenejoj pleniĝos de greno, kaj
la premejoj superpleniĝos de mosto kaj de oleo. 25
Kaj Mi rekompencos vin pro tiuj jaroj, kiam ĉion
formanĝis la akridoj, skaraboj, vermoj, kaj raŭpoj, Mia
granda armeo, kiun Mi sendis sur vin. 26 Kaj vi povos
manĝi sate, kaj vi gloros la nomon de la Eternulo, via
Dio, kiu agis kun vi mirinde; kaj Mia popolo neniam
plu havos malhonoron. 27 Kaj vi ekscios, ke Mi estas
meze de Izrael, ke Mi, la Eternulo, estas via Dio, kaj
alia ne ekzistas; kaj Mia popolo neniam plu havos
malhonoron. 28 Post tio Mi elverŝos Mian spiriton
sur ĉiun karnon; viaj filoj kaj viaj filinoj profetos,
viaj maljunuloj havos sonĝojn, viaj junuloj havos
viziojn. 29 Eĉ sur la sklavojn kaj sur la sklavinojn
Mi en tiu tempo elverŝos Mian spiriton. 30 Kaj Mi
donos miraklajn signojn en la ĉielo kaj sur la tero:
sangon, fajron, kaj kolonojn da fumo. 31 La suno
fariĝos malluma, kaj la luno fariĝos sanga, antaŭ ol
venos la granda kaj timinda tago de la Eternulo. 32
Kaj ĉiu, kiu vokos la nomon de la Eternulo, saviĝos;
ĉar sur la monto Cion kaj en Jerusalem estos savo,
kiel diris la Eternulo, ankaŭ por la restintoj, kiujn la
Eternulo alvokos.

3 Ĉar jen en tiuj tagoj kaj en tiu tempo, kiam Mi
revenigos la forkaptitojn de Judujo kaj de Jerusalem,
2 Mi kolektos ĉiujn naciojn kaj venigos ilin en la valon
de Jehoŝafat; kaj tie Mi faros super ili juĝon pro Mia
popolo kaj Mia heredaĵo Izrael, kiun ili disĵetis inter
la naciojn, dividinte Mian landon; 3 kaj pro tio, ke ili
lotis pri Mia popolo, fordonis knabon pro manĝaĵo kaj
knabinon vendis pro vino, kaj drinkis. 4 Kaj kion vi
volas de Mi, ho Tiro, Cidon, kaj ĉiuj distriktoj Filiŝtaj?
ĉu vi volas repagi al Mi? kaj se vi volos repagi al Mi, Mi
facile kaj baldaŭ turnos vian repagon sur vian kapon.
5 Mian arĝenton kaj Mian oron vi prenis, kaj Miajn plej
bonajn valoraĵojn vi transportis en viajn templojn,
6 kaj la filojn de Judujo kaj la filojn de Jerusalem
vi vendis al la filoj de la Grekoj, por malproksimigi
ilin de iliaj limoj; 7 sed jen Mi vekos ilin el tiu loko,
kien vi vendis ilin, kaj vian agon Mi turnos sur vian
kapon; 8 kaj Mi vendos viajn filojn kaj viajn filinojn
en la manojn de la Judoj, kaj ĉi tiuj vendos ilin al la
Ŝebaanoj, al popolo malproksima; ĉar la Eternulo tion
diris. 9 Proklamu tion inter la nacioj; pretiĝu al milito,
veku la kuraĝulojn; ĉiuj militistoj leviĝu kaj eliru.
10 Forĝu el viaj plugiloj glavojn, kaj el viaj rikoltiloj
lancojn; la malfortulo diru: Mi estas forta. 11 Rapidu
kaj venu, ĉiuj nacioj de ĉiuj flankoj, kaj kolektiĝu;
tien alkonduku, ho Eternulo, Viajn fortulojn. 12 La
popoloj leviĝu kaj iru en la valon de Jehoŝafat; ĉar
tie Mi sidiĝos, por juĝi ĉiujn naciojn de ĉiuj flankoj.
13 Svingu la rikoltilon, ĉar la rikoltaĵo estas matura;
venu malsupren, ĉar la premejoj estas plenaj kaj la
tinoj tropleniĝis; ĉar granda estas ilia malboneco. 14
Amasoj post amasoj kolektiĝas en la valo de la juĝo,
ĉar alproksimiĝas la tago de la Eternulo en la valo de
la juĝo. 15 La suno kaj la luno senlumiĝos, kaj la steloj
perdos sian brilon. 16 Kaj la Eternulo ektondros el
Cion kaj aŭdigos Sian voĉon el Jerusalem; ektremos la
ĉielo kaj la tero; sed la Eternulo estos rifuĝejo por Sia
popolo, kaj fortikaĵo por la idoj de Izrael. 17 Kaj vi
ekscios, ke Mi, la Eternulo, estas via Dio, kiu loĝas
en Cion, sur Mia sankta monto; kaj Jerusalem estos
sanktejo, kaj fremduloj ne plu iros tra ĝi. 18 En tiu
tago la montoj elgutigos dolĉan sukon, el la montetoj
fluos lakto, kaj ĉiuj torentoj de Judujo estos plenaj
de akvo; kaj fonto eliros el la domo de la Eternulo
kaj liveros akvon al la valo Ŝitima. 19 Egiptujo fariĝos
dezerto, kaj Edom fariĝos senviva dezerto, pro tio,
ke ili premis la idojn de Jehuda kaj verŝis senkulpan
sangon en sia lando. 20 Sed Judujo estos loĝata eterne,
kaj Jerusalem en ĉiuj generacioj. 21 Kaj Mi venĝos pro
ilia sango, kiu ne estis venĝita de Mi; kaj la Eternulo
loĝados en Cion.

# Amos

1 Vortoj de Amos, paŝtisto el Tekoa, kiujn li laŭvizie
eldiris pri Izrael en la tempo de Uzija, reĝo de
Judujo, kaj en la tempo de Jerobeam, filo de Joaŝ,
reĝo de Izrael, du jarojn antaŭ la tertremo. 2 Li
diris: La Eternulo ektondros el Cion kaj aŭdigos Sian
voĉon el Jerusalem; kaj ekfunebros la paŝtejoj de la
paŝtistoj, kaj sekiĝos la supro de Karmel. 3 Tiele diras
la Eternulo: Pro tri krimoj de Damasko kaj pro kvar
Mi ne indulgos ĝin, pro tio, ke ili draŝis Gileadon
per fera draŝilo. 4 Mi sendos fajron sur la domon de
Ĥazael, kaj ĝi ekstermos la palacojn de Ben-Hadad. 5
Mi disrompos la riglilojn de Damasko, Mi ekstermos la
loĝantojn de la valo Aven kaj la tenanton de sceptro el
la domo Edena, kaj la popolo Siria estos forkondukita
en Kiron, diras la Eternulo. 6 Tiele diras la Eternulo:
Pro tri krimoj de Gaza kaj pro kvar Mi ne indulgos
ĝin, pro tio, ke ili tute forkondukis la kaptitojn, por
transdoni ilin al Edom. 7 Mi sendos fajron sur la
muregon de Gaza, kaj ĝi ekstermos ĝiajn palacojn. 8
Mi ekstermos la loĝantojn de Aŝdod kaj la tenanton de
sceptro el Aŝkelon, Mi direktos Mian manon kontraŭ
Ekronon, kaj pereos la restintoj de la Filiŝtoj, diras la
Sinjoro, la Eternulo. 9 Tiele diras la Eternulo: Pro tri
krimoj de Tiro kaj pro kvar Mi ne indulgos ĝin, pro
tio, ke ili transdonis en plenan malliberecon al Edom
kaj ne memoris la fratan interligon. 10 Mi sendos
fajron sur la muregon de Tiro, kaj ĝi ekstermos ĝiajn
palacojn. 11 Tiele diras la Eternulo: Pro tri krimoj de
Edom kaj pro kvar Mi ne indulgos lin, pro tio, ke li
persekutis kun glavo sian fraton, ke li sufokis en si
la kompaton, ke li senĉese furiozas en sia kolero kaj
konservas sian furiozon por ĉiam. 12 Mi sendos fajron
sur Temanon, kaj ĝi ekstermos la palacojn de Bocra. 13
Tiele diras la Eternulo: Pro tri krimoj de la Amonidoj
kaj pro kvar Mi ne indulgos ilin, pro tio, ke ili dishakis
gravedulinojn en Gilead, por plivastigi siajn limojn.
14 Mi ekbruligos fajron sur la murego de Raba, kaj
ĝi ekstermos ĝiajn palacojn, kun bruo en la tago de
batalo, kun ventego en la tago de malkvieteco. 15 Kaj
ilia reĝo iros en forkaptitecon, li, kaj kune ankaŭ liaj
eminentuloj, diras la Eternulo.

2 Tiele diras la Eternulo: Pro tri krimoj de Moab kaj
pro kvar Mi ne indulgos lin, pro tio, ke li forbruligis
la ostojn de la reĝo de Edom ĝis cindreco. 2 Mi sendos
fajron sur Moabon, kaj ĝi ekstermos la palacojn de
Keriot; kaj Moab mortos en tumulto, ĉe bruo kaj
sonado de trumpeto. 3 Mi ekstermos juĝiston el meze
de li, kaj ĉiujn liajn eminentulojn Mi mortigos kune
kun li, diras la Eternulo. 4 Tiele diras la Eternulo: Pro
tri krimoj de Jehuda kaj pro kvar Mi ne indulgos lin,
pro tio, ke ili forpuŝis la instruon de la Eternulo, ne
observis Liajn leĝojn, kaj permesis sin delogiĝi per
la mensogaĵoj, kiujn sekvis iliaj patroj. 5 Mi sendos
fajron sur Judujon, kaj ĝi ekstermos la palacojn de
Jerusalem. 6 Tiele diras la Eternulo: Pro tri krimoj
de Izrael kaj pro kvar Mi ne indulgos lin, pro tio, ke
ili vendas virtulon pro arĝento kaj malriĉulon pro
paro da ŝuoj. 7 Ili premas la kapon de senhavuloj en
la polvon de la tero, ili baras la vojon de humiluloj;
filo kaj patro iras al unu knabino, por malhonori
Mian sanktan nomon. 8 Sur garantidonitaj vestoj ili
kuŝas apud ĉiu altaro, kaj vinon de punitoj ili trinkas
en la domo de sia dio. 9 Kaj Mi ekstermis antaŭ ili
la Amoridon, kiu estis alta kiel cedro kaj forta kiel
kverko; Mi ekstermis liajn fruktojn supre kaj liajn
radikojn malsupre. 10 Mi elkondukis vin el la lando
Egipta kaj kondukis vin en la dezerto dum kvardek
jaroj, por ke vi ekposedu la landon de la Amorido.
11 El viaj filoj Mi faris profetojn kaj el viaj junuloj
konsekritojn; ĉu ne estas tiel, ho filoj de Izrael? diras
la Eternulo. 12 Sed vi trinkigis al la konsekritoj vinon,
kaj al la profetoj vi ordonis: Ne profetu. 13 Jen Mi
krakigos sub vi, kiel krakas veturilo, plenigita de
garboj. 14 Eĉ lertulo ne povos forkuri, fortulo ne
povos ion fari per sia forto, kaj heroo ne povos savi
sian vivon; 15 la arkpafistoj ne povos kontraŭstari,
rapidpiedulo ne saviĝos, kaj rajdanto ne savos sian
vivon; 16 kaj la plej kuraĝa el la herooj forkuros nuda
en tiu tago, diras la Eternulo.

3 Aŭskultu ĉi tiun vorton, kiun la Eternulo eldiris
pri vi, ho Izraelidoj, pri la tuta gento, kiun Mi
elkondukis el la lando Egipta: 2 nur vin Mi distingis
el ĉiuj gentoj de la tero, tial Mi punos vin pro
ĉiuj viaj malbonagoj. 3 Ĉu iras du kune, se ili ne
interkonsentis? 4 Ĉu leono krias en la arbaro, se ĝi
ne havas disŝirotaĵon? ĉu leonido aŭdigas sian voĉon
el sia kaverno, se ĝi nenion kaptis? 5 Ĉu birdo falas
en kaptilon sur la tero, se ne ekzistas birdokaptisto?
ĉu kaptilo leviĝas de la tero, se nenio kaptiĝis per
ĝi? 6 Ĉu oni blovas per korno en urbo, kaj la popolo

ne ektimas? ĉu okazas malfeliĉo en urbo, se tion
ne faris la Eternulo? 7 La Sinjoro, la Eternulo, faras
nenion, ne malkaŝinte Sian sekreton al Siaj servantoj,
la profetoj. 8 Kiam leono ekkriis, kiu ne ektimos? kiam
la Sinjoro, la Eternulo, parolis, kiu tiam ne profetos?
9 Aŭdigu en la palacoj de Aŝdod kaj en la palacoj de
la lando Egipta, kaj diru: Kolektiĝu sur la montoj de
Samario, kaj rigardu, kia granda tumulto estas en ĝi
kaj kia granda rabado estas farata meze de ĝi. 10 Ili ne
povoscias agi juste, diras la Eternulo; trezoroj, akiritaj
per rabado kaj perfortado, estas en iliaj palacoj. 11 Tial
tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Malamiko aperos kaj
ĉirkaŭos la landon, kaj li deŝiros de vi vian forton, kaj
viaj palacoj estos prirabitaj. 12 Tiele diras la Eternulo:
Kiel paŝtisto savas el la buŝo de leono du krurojn aŭ
parton de orelo, tiel saviĝos la Izraelidoj, kiuj sidos
en Samario sur la rando de lito kaj en Damasko sur
kuŝejo. 13 Aŭskultu, kaj atestu kontraŭ la domo de
Jakob, diras la Sinjoro, la Eternulo, Dio Cebaot. 14 Ĉar
en la tago, kiam Mi punos Izraelon pro liaj krimoj, Mi
punos ankaŭ la altarojn en Bet-El, kaj dehakitaj estos
la kornoj de la altaro kaj falos sur la teron. 15 Kaj Mi
frapos la vintran domon kune kun la somera domo;
kaj malaperos la domoj eburaj, kaj multe da domoj
malaperos, diras la Eternulo.

4 Aŭskultu ĉi tiun vorton, vi grasaj bovinoj, kiuj
estas sur la monto de Samario, kiuj turmentas
senhavulojn, premas malriĉulojn, kaj kiuj diras al siaj
mastroj: Venu, ni drinku. 2 La Sinjoro, la Eternulo,
ĵuris per Sia sankteco, ke jen venos sur vin tagoj,
kiam oni forportos vin per hokoj kaj viajn idojn per
fiŝhokoj. 3 Kaj tra breĉoj vi eliros, ĉiu aparte, kaj estos
ĵetitaj sur Harmonon, diras la Eternulo. 4 Iru en Bet-
Elon, por peki, en Gilgalon, por multe krimi; alportu
viajn oferojn ĉiumatene kaj vian dekonaĵon en ĉiu
tria tago. 5 Incensu laŭdoferon el fermentaĵo, kriu
pri memvolaj oferoj, aŭdigu pri ili; ĉar tion vi amas,
ho Izraelidoj, diras la Sinjoro, la Eternulo. 6 Tial Mi
donis al vi purecon de la dentoj en ĉiuj viaj urboj
kaj mankon de pano en ĉiuj viaj lokoj; vi tamen ne
revenis al Mi, diras la Eternulo. 7 Mi ankaŭ rifuzis al
vi la pluvon, kiam estis ankoraŭ tri monatoj antaŭ la
rikolto; Mi donis pluvon super unu urbo, kaj super
alia Mi ne donis pluvon; unu kampo estis pripluvata,
kaj alia, ne pripluvita, elsekiĝis. 8 Kaj du, tri urboj
iris al unu urbo, pro trinki akvon, kaj ne povis trinki
sufiĉe; vi tamen ne revenis al Mi, diras la Eternulo. 9
Mi frapis vin per brulsekiĝo kaj velkiĝo de la greno;
viajn multajn ĝardenojn, vinberĝardenojn, figarbojn,
kaj olivarbojn formanĝis raŭpoj; vi tamen ne revenis
al Mi, diras la Eternulo. 10 Mi sendis sur vin peston
sur la vojo al Egiptujo, Mi mortigis per glavo viajn
junulojn kaj forkondukis viajn ĉevalojn, kaj Mi levis la
malbonodoron de via tendaro en viajn nazotruojn; vi
tamen ne revenis al Mi, diras la Eternulo. 11 Mi faris
inter vi renverson, kiel Dio renversis Sodomon kaj
Gomoran, kaj vi fariĝis kiel brulanta ŝtipo, savita el
brulo; vi tamen ne revenis al Mi, diras la Eternulo. 12
Tial tiele Mi agos kun vi plue, ho Izrael; kaj ĉar Mi
tiele agos kun vi, tial pretigu vin renkonte al via Dio,
ho Izrael. 13 Ĉar Li estas Tiu, kiu faras montojn, kreas
venton, diras al la homo, kion ĉi tiu intencas; Li faras
la ĉielruĝon kaj la nebulon; Li iras sur la altaĵoj de la
tero; Lia nomo estas Eternulo, Dio Cebaot.

5 Aŭskultu ĉi tiun vorton, per kiu mi plorkantas pri
vi, ho domo de Izrael. 2 Falis kaj ne releviĝos la
virgulino de Izrael; ŝi estas ĵetita sur la teron, kaj
neniu ŝin restarigos. 3 Ĉar tiele diras la Sinjoro, la
Eternulo: La urbo, kiu elirigas milon, restos nur kun
cento, kaj tiu, kiu elirigas centon, restos nur kun deko
en la domo de Izrael. 4 Ĉar tiele diras la Eternulo al la
domo de Izrael: Turnu vin al Mi, kaj tiam vi vivos. 5
Ne turnu vin al Bet-El, ne iru en Gilgalon, ne migru
al Beer-Ŝeba; ĉar Gilgal estos elpatrujigita kaj Bet-El
fariĝos senvalora. 6 Turnu vin al la Eternulo, kaj vivu,
por ke la domo de Jozef ne ekflamu kiel fajro, kiu
ekstermos, kaj neniu estingos en Bet-El. 7 La juĝon vi
faras vermuto, kaj la veron vi ĵetas sur la teron. 8 Li
kreis la Plejadojn kaj Orionon; Li faras el la mallumo
matenon, kaj el la tago Li faras malluman nokton; Li
vokas la akvon de la maro kaj verŝas ĝin sur la teron;
Lia nomo estas Eternulo. 9 Li sendas malfeliĉon sur
fortulon, kaj malfeliĉo trafas urbon fortikigitan. 10
Sed ili malamas tiun, kiu admonas ilin en la pordego,
kaj ili abomenas tiun, kiu parolas honestaĵon. 11 Tial
pro tio, ke vi premas senhavulon kaj forprenas de li la
panon per grandaj impostoj, vi konstruos domojn el
hakitaj ŝtonoj, sed vi ne loĝos en ili; vi plantos ĉarmajn
vinberĝardenojn, sed vi ne trinkos ilian vinon. 12
Ĉar Mi scias, kiel multaj estas viaj krimoj kaj kiel
gravaj estas viaj pekoj: vi premas virtulon, vi prenas
subaĉeton, vi forpuŝas malriĉulojn en la pordego. 13

Tial la saĝulo silentas en ĉi tiu tempo, ĉar ĝi estas
tempo malbona. 14 Serĉu bonon, ne malbonon, por ke
vi vivu; tiam la Eternulo, Dio Cebaot, estos kun vi,
kiel vi diras. 15 Malamu la malbonon, amu la bonon,
kaj starigu en la pordego justecon; eble la Eternulo,
Dio Cebaot, indulgos la restintojn de Jozef. 16 Tial
tiele diras la Eternulo, Dio Cebaot, la Sinjoro: Sur ĉiuj
placoj estos plorado, sur ĉiuj stratoj oni dirados: Ho
ve, ho ve! kaj oni vokos la plugiston, por plori, kaj la
sciantojn de funebraj kantoj, por plorkanti. 17 Kaj en
ĉiuj vinberĝardenoj estos plorado, kiam Mi trairos
meze de vi, diras la Eternulo. 18 Ve al tiuj, kiuj deziras
vidi la tagon de la Eternulo! por kio vi ĝin deziras? la
tago de la Eternulo estas malluma, ne luma. 19 Tiel
same, kiel se iu forkuras de leono kaj lin kaptas urso,
aŭ li venis hejmen kaj apogis sian manon al muro kaj
lin pikas serpento. 20 Malluma estos ja la tago de la
Eternulo, ne luma; malluma kaj sen ia brilo. 21 Mi
malamas, Mi abomenas viajn festojn, kaj Mi ne flaras
la oferojn de viaj solenaj tagoj. 22 Kiam vi alportas al
Mi bruloferojn kaj viajn farunoferojn, Mi ne akceptas
ilin, kaj viajn grasajn dankoferojn Mi ne rigardas.
23 Forigu de Mi la bruon de viaj kantoj, la sonadon
de viaj psalteroj Mi ne volas aŭskulti. 24 Sed justeco
fluu kiel akvo, kaj vero kiel potenca torento. 25 Ĉu
buĉoferojn kaj farunoferojn vi alportadis al Mi en la
dezerto dum kvardek jaroj, ho domo de Izrael? 26 Vi
portis la tabernaklon de via Moleĥ, la kolonon de via
idolo, la stelon de via dio, kiun vi faris al vi. 27 Tial Mi
elpatrujigos vin trans Damaskon, diras la Eternulo,
kies nomo estas Dio Cebaot.

**6** Ve al la senzorguloj en Cion, kaj al tiuj, kiuj fidas
la monton de Samario, al la eminentuloj de la
unuauloj inter la nacioj, al kiuj sin turnas la domo
de Izrael! 2 Iru al Kalne, kaj rigardu; de tie iru en la
grandan Ĥamat, poste iru al Gat de la Filiŝtoj: ĉu ili
estas pli bonaj ol tiuj regnoj, ĉu iliaj limoj estas pli
vastaj ol viaj limoj? 3 Tiuj, kiu pensas, ke la tago de
malfeliĉo estas malproksima, kaj tenas sin proksime
de la seĝo de maljusteco; 4 kiuj kuŝas sur eburaj litoj
kaj dorlotas sin sur sia kuŝejo, manĝas la plej bonajn
ŝafojn el la ŝafaro kaj bovidojn el la nutrejo; 5 kiuj
tintas sur psalteroj, pensante, ke ili estas muzikistoj
egalaj al David; 6 kiuj trinkas vinon el grandaj kalikoj,
ŝmiras sin per la plej bonaj oleaĵoj, kaj ne zorgas pri la
mizero de Jozef: 7 ili tial nun estos la unuaj, kiuj iros
en forkaptitecon, kaj la ĝojkriado de la dorlotiĝantoj
finiĝos. 8 La Sinjoro, la Eternulo, ĵuris per Si mem,
diras la Eternulo, Dio Cebaot: Mi abomenas la fierecon
de Jakob, kaj liajn palacojn Mi malamas; Mi transdonos
la urbon kun ĉio, kion ĝi enhavas. 9 Kaj se dek homoj
restos en unu domo, ili ankaŭ mortos. 10 Kaj prenos
ilin ilia amiko aŭ kadavrobruliganto, por elporti la
ostojn el la domo, kaj li diros al tiu, kiu estas ĉe la
domo: Ĉu estas ankoraŭ iu ĉe vi? Kaj ĉi tiu respondos:
Neniu plu. Kaj tiu diros: Silentu, oni ne devas elparoli
la nomon de la Eternulo. 11 Ĉar jen la Eternulo donas
ordonon frapi la grandajn domojn per fendoj kaj la
malgrandajn domojn per breĉoj. 12 Ĉu kuras ĉevaloj
sur roko? ĉu oni povas plugi ĝin per bovoj? Vi tamen
faris la juĝon veneno, kaj la frukton de la vero vi faris
vermuto. 13 Vi ĝojas pro senvaloraĵoj; vi diras: Ĉu ne
per nia forto ni akiris al ni potencon? 14 Jen, diras la
Eternulo, Dio Cebaot, Mi levos kontraŭ vin, ho domo
de Izrael, nacion, kiu premos vin de Ĥamat ĝis la
torento de la stepo.

**7** Tian vizion donis al mi la Sinjoro, la Eternulo: jen
Li kreis akridojn en la komenco de kreskado de
la postfalĉaĵo; la postfalĉaĵo aperis post la falĉado
por la reĝo. 2 Kiam ili finis la manĝadon de la herbo
sur la tero, mi diris: Ho Sinjoro, ho Eternulo, volu
pardoni! Kiu restarigos Jakobon? li estas ja malgranda.
3 Tiam la Eternulo bedaŭris tion: Tio ne estos, diris
la Eternulo. 4 Tian vizion donis al mi la Sinjoro, la
Eternulo: jen la Sinjoro, la Eternulo, proklamis juĝon
per fajro, ke ĝi ekstermu la grandan abismon kaj
ekstermu la kampojn. 5 Kaj mi diris: Ho Sinjoro,
ho Eternulo, volu haltigi! Kiu restarigos Jakobon? li
estas ja malgranda. 6 La Eternulo bedaŭris ankaŭ
tion: Tio ne estos, diris la Sinjoro, la Eternulo. 7
Li donis al mi tian vizion: jen la Sinjoro staris sur
murego vertikala, kaj vertikalon Li tenis en Sia mano.
8 Kaj la Eternulo diris al mi: Kion vi vidas, Amos?
Mi respondis: Vertikalon. Kaj la Sinjoro diris: Jen Mi
metos vertikalon meze de Mia popolo Izrael; Mi ne
plu indulgos ĝin; 9 kaj dezertiĝos la altaĵoj de Isaak,
kaj la sanktejoj de Izrael estos ruinigitaj; kaj Mi levos
Min kun glavo kontraŭ la domon de Jerobeam. 10
Amacja, pastro el Bet-El, sendis al Jerobeam, reĝo de
Izrael, por diri: Amos faras kontraŭ vi ribelon meze de
la domo de Izrael; la lando ne povas toleri ĉiujn liajn
vortojn; 11 ĉar tiele diras Amos: Jerobeam mortos de

glavo, kaj Izrael estos forkondukita el sia lando. 12 Kaj
Amacja diris al Amos: Ho viziisto, iru kaj forkuru en la
landon de Jehuda, tie nutru vin, kaj tie profetu; 13 sed
en Bet-El ne plu profetu, ĉar ĝi estas sanktejo de la
reĝo kaj domo de la regno. 14 Amos respondis kaj diris
al Amacja: Mi ne estas profeto, nek filo de profeto, mi
estas nur paŝtisto, kaj mi kultivas sikomorojn; 15 sed
la Eternulo prenis min de la ŝafaro, kaj la Eternulo
diris al mi: Iru kaj profetu al Mia popolo Izrael. 16 Kaj
nun aŭskultu la vorton de la Eternulo: Vi diras: Ne
profetu pri Izrael, kaj ne prediku pri la domo de Isaak;
17 tial tiele diras la Eternulo: Via edzino malĉastos
en la urbo, viaj filoj kaj viaj filinoj falos de glavo, via
tero estos dividita per la ŝnuro, kaj vi mortos sur tero
malpura; kaj Izrael estos forkondukita el sia lando.

8 Tian vizion donis al mi la Sinjoro, la Eternulo: mi
vidis korbon kun maturaj fruktoj. 2 Kaj Li diris: Kion
vi vidas, Amos? Mi respondis: Korbon kun maturaj
fruktoj. Tiam la Eternulo diris al mi: Venis la fino por
Mia popolo Izrael; Mi ne plu indulgos ĝin. 3 La kantoj de
la palaco fariĝos lamentoj en tiu tago, diras la Sinjoro,
la Eternulo; estos multe da kadavroj; sur ĉiu loko oni
ĵetos ilin silente. 4 Aŭskultu ĉi tion, vi, kiuj penas
engluti la malriĉulojn kaj pereigi la humilulojn de la
tero, 5 kaj kiuj diras: Kiam pasos la monatkomenco,
ke ni povu vendadi grenon? kaj la sabato, ke ni povu
malfermi la grenejon? Ni malgrandigos la mezuron, ni
pligrandigos la prezon, kaj ni trompos per falsa pesilo;
6 ni aĉetos senhavulojn per mono kaj malriĉulon
per paro da ŝuoj, kaj grenventumaĵon ni vendos kun
la greno. 7 La Eternulo ĵuris per la gloro de Jakob:
Neniam Mi forgesos ĉiujn iliajn farojn. 8 Ĉu pro tio ne
ektremos la tero, ne ekploros ĉiuj ĝiaj loĝantoj? Ĝi
tuta ekskuiĝos kiel lago, ĝi leviĝos kaj malleviĝos kiel
la Rivero de Egiptujo. 9 En tiu tago, diras la Sinjoro,
la Eternulo, Mi subirigos la sunon en tagmezo, kaj
Mi mallumigos la teron meze de luma tago. 10 Mi
aliformigos viajn festojn en funebron kaj ĉiujn viajn
kantojn en lamentojn; Mi metos sakaĵon sur ĉiujn
lumbojn kaj kalvon sur ĉiun kapon; Mi aperigos ĉe ili
funebron, kiel pri sola filo, kaj ilia fino estos tago de
maldolĉeco. 11 Jen venos tagoj, diras la Sinjoro, la
Eternulo, kaj Mi sendos malsaton en la landon, ne
malsaton pri pano kaj ne soifon pri akvo, sed soifon
por aŭskultado de la vortoj de la Eternulo. 12 Kaj ili
vagados de maro ĝis maro, kaj de nordo ĝis oriento
ili migrados, por serĉi la vorton de la Eternulo, sed
ili ne trovos. 13 En tiu tago senfortiĝos de soifo la
belaj junulinoj kaj la junuloj, 14 kiuj nun ĵuras per la
peko de Samario, kaj diras: Kiel vivas via dio, ho Dan!
kiel floras la vojo al Beer-Ŝeba! ili falos, kaj ne plu
releviĝos.

9 Mi vidis la Eternulon, kiu staris super la altaro; kaj
Li diris: Frapu la kapitelon, ke la fostoj ekskuiĝu kaj
la pecoj falu sur la kapojn de ĉiuj; kaj ilian naskitaron
Mi mortigos per glavo, neniu el ili forkuros, neniu
el ili saviĝos. 2 Eĉ se ili enfosus sin en Ŝeolon, eĉ
de tie Mia mano ilin prenos; eĉ se ili suprenirus en
la ĉielon, Mi de tie depuŝos ilin. (Sheol h7585) 3 Se ili
kaŝus sin sur la supro de Karmel, Mi tie elserĉos kaj
prenos ilin; se ili kaŝiĝus for de Miaj okuloj sur la
fundo de la maro, eĉ tie Mi ordonos al la serpento, ke
ĝi piku ilin. 4 Se ili iros en forkaptitecon antaŭ siaj
malamikoj, ankaŭ tie Mi ordonos al la glavo mortigi
ilin. Mi direktos sur ilin Miajn okulojn por malfeliĉo,
ne por bono. 5 La Sinjoro, la Eternulo Cebaot, ektuŝas
landon, kaj ĝi tiam fandiĝas, kaj ĉiuj loĝantoj ploras;
ĝi tuta ekskuiĝas kiel lago, malleviĝas kiel la Rivero
de Egiptujo. 6 Li konstruis Sian loĝejon en la ĉielo,
kaj Sian firmamenton Li fundamentis sur la tero; Li
vokas la akvon de la maro kaj verŝas ĝin sur la teron;
Lia nomo estas Eternulo. 7 Ĉu vi ne estas por Mi kiel
la Etiopoj, ho Izraelidoj? diras la Eternulo; ĉu Mi ne
elkondukis Izraelon el la lando Egipta, la Filiŝtojn
el Kaftor, kaj la Sirianojn el Kir? 8 Jen la okuloj de
la Sinjoro, la Eternulo, estas direktitaj sur la pekan
regnon, kaj Mi ekstermos ĝin de sur la tero; tamen
ne tute Mi ekstermos la domon de Jakob, diras la
Eternulo. 9 Jen Mi ordonos, kaj disĵetigos la domon
de Izrael inter ĉiujn naciojn, kiel oni disĵetas per
kribrilo, kaj eĉ unu grajno ne falos sur la teron. 10 De
glavo mortos ĉiuj pekuloj de Mia popolo, kiuj diras:
Malfeliĉo ne alproksimiĝos al ni kaj ne trafos nin. 11
En tiu tempo Mi restarigos la falintan tabernaklon
de David, Mi reŝtopos ĝiajn breĉojn, Mi restarigos
la detruitaĵon, kaj Mi rekonstruos ĝin, kiel en la
tempo antikva, 12 por ke ili ekposedu la restaĵon
de Edom kaj ankaŭ ĉiujn naciojn, inter kiuj estos
proklamata Mia nomo, diras la Eternulo, kiu tion faras.
13 Jen venos tagoj, diras la Eternulo, kiam la pluganto
renkontiĝos kun la rikoltanto, la vinberpremanto kun
la semanto; kaj la montoj elgutigos dolĉan sukon, kaj

ĉiuj montetoj fariĝos fruktoportaj. **14** Kaj Mi revenigos
la forkaptitojn de Mia popolo Izrael, ili rekonstruos la
ruinigitajn urbojn, enloĝiĝos, plantos vinberĝardenojn
kaj trinkos ilian vinon, aranĝos ĝardenojn kaj manĝos
iliajn fruktojn. **15** Kaj Mi replantos ilin sur ilia tero,
kaj ili ne plu estos elŝirataj el sia tero, kiun Mi donis
al ili, diras la Eternulo, via Dio.

# Obadja

**1** Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo, pri Edom: Diron
ni aŭdis de la Eternulo, kaj kuriero estas sendita al
la nacioj: Leviĝu, ni iru milite kontraŭ lin. 2 Vidu,
Mi faris vin malgranda inter la nacioj; vi estas tre
malestimata. 3 La fiereco de via koro delogis vin;
loĝante en la fendegoj de rokoj, sur via alta sidejo,
vi diras en via koro: Kiu depuŝos min sur la teron?
4 Sed se vi eĉ leviĝus tiel alte, kiel aglo, aŭ se vi
aranĝus vian neston inter la steloj, eĉ de tie Mi ĵetos
vin malsupren, diras la Eternulo. 5 Ĉu ŝtelistoj venis
al vi, aŭ noktaj rabistoj? kiamaniere vi estas tiel
ruinigita? ili ŝtelus nur tiom, kiom sufiĉus por ili. Se
vinberkolektantoj venus al vi, ili restigus ja forgesitajn
berojn. 6 Kiel forte Esav estas priserĉita kaj liaj kaŝejoj
estas traesploritaj! 7 Al la limo vin puŝis ĉiuj viaj
interliganoj, trompis kaj perfortis vin viaj amikoj; la
manĝantoj de via pano metis sub vin kaptilon, kiun vi
eĉ ne rimarkis. 8 En tiu tempo, diras la Eternulo, Mi
pereigos ja la saĝulojn ĉe Edom kaj la prudenton sur
la monto de Esav. 9 Ektimos viaj kuraĝuloj, ho Teman,
por ke ĉiuj sur la monto de Esav estu ekstermitaj
per mortigo. 10 Pro tio, ke vi premis vian fraton
Jakob, kovros vin honto, kaj vi estos ekstermita por
ĉiam. 11 En la tempo, kiam vi staris apude, kiam
fremduloj kondukis lian militistaron en kaptitecon
kaj aligentuloj eniris en liajn pordegojn kaj lotis pri
Jerusalem, vi ankaŭ estis kiel unu el ili. 12 Vi devus ne
rigardi la malfeliĉan tagon de via frato, la tagon de lia
forpuŝiteco, kaj vi devus ne ĝoji pri la idoj de Jehuda
en la tago de ilia pereo, nek fanfaroni en la tago de
ilia mizero. 13 Vi devus ne eniri en la pordegon de
Mia popolo en la tago de ilia malfeliĉo, vi devus ne
rigardi ilian suferadon en la tago de ilia malfeliĉo,
nek tuŝi ilian havaĵon en la tago de ilia malfeliĉo. 14
Vi devus ne stari ĉe la vojdisiĝo, por ekstermi iliajn
forsaviĝintojn, nek transdoni iliajn restintojn en la
tago de malfeliĉo. 15 Ĉar proksima estas la tago de la
Eternulo kontraŭ ĉiuj nacioj. Kiel vi agis, tiel oni agos
kun vi; kion vi meritas, tio venos sur vian kapon. 16
Ĉar kiel vi trinkis sur Mia sankta monto, tiel trinkos
ĉiam ĉiuj nacioj; ili trinkos, trinkos ĝisfunde, ĝis ili
fariĝos kiel tute ne ekzistintaj. 17 Sed sur la monto
Cion estos saviĝo, kaj ĝi estos sankta; kaj la domo de
Jakob ekposedos tiujn, kiuj ilin posedis. 18 La domo de
Jakob estos fajro, la domo de Jozef estos flamo; sed
la domo de Esav estos pajlo, oni ekbruligos ĝin kaj
ekstermos ĝin, kaj neniu restos el la domo de Esav;
ĉar la Eternulo tion diris. 19 Kaj la sudanoj ekposedos
la monton de Esav, kaj la loĝantoj de la malaltaĵo la
Filiŝtojn; ili ekposedos la kampojn de Efraim kaj la
kampojn de Samario; kaj Benjamen posedos Gileadon.
20 Kaj tiu multo da forkondukitaj Izraelidoj en la lando
Kanaana ĝis Carfat kaj la forkondukitaj el Jerusalem
en Sefarad ekposedos la urbojn sudajn. 21 Kaj venos
savantoj sur la monton Cion, por juĝi la monton de
Esav. Kaj la regado apartenos al la Eternulo.

# Jona

1 Aperis vorto de la Eternulo al Jona, filo de Amitaj,
dirante: 2 Leviĝu, iru en la grandan urbon Nineve,
kaj prediku kontraŭ ĝi; ĉar iliaj malbonagoj leviĝis
antaŭ Min. 3 Sed Jona leviĝis, por forkuri de antaŭ
la Eternulo en Tarŝiŝon; li iris en Jafon, trovis ŝipon,
forirontan al arŝiŝ, pagis pro la vojaĝo, kaj eniris en
ĝin, por veturi kun ili al Tarŝiŝ, for de la Eternulo. 4
Sed la Eternulo sendis grandan venton sur la maron,
kaj sur la maro fariĝis granda ventego, kaj oni pensis,
ke la ŝipo pereos. 5 La ŝipanoj ektimis kaj komencis
voki ĉiu al sia dio; kaj la objektojn, kiuj troviĝis en
la ŝipo, oni ĵetis en la maron, por malpligrandigi la
pezon. Sed Jona iris malsupren, en la internon de
la ŝipo, kuŝiĝis, kaj endormiĝis. 6 Kaj aliris al li la
ŝipestro, kaj diris al li: Kial vi dormas? leviĝu, kaj voku
al via Dio; eble Dio rememoros pri ni, kaj ni ne pereos.
7 Kaj oni diris unu al alia: Ni lotu, por ke ni eksciu,
pro kiu trafis nin ĉi tiu malfeliĉo. Ili lotis, kaj la loto
trafis Jonan. 8 Tiam ili diris al li: Vi, pro kiu nin trafis
ĉi tiu malfeliĉo, diru al ni, per kio vi vin okupas? de
kie vi venis? kie estas via lando? kaj el kiu popolo vi
estas? 9 Kaj li respondis al ili: Mi estas Hebreo: mi
respektas la Eternulon, Dion de la ĉielo, kiu kreis la
maron kaj la sekteron. 10 Tiam tiuj homoj ektimis
per granda timo, kaj diris al li: Kion vi faris? ĉar tiuj
homoj eksciis, ke li forkuris de antaŭ la Eternulo, kiel
li mem diris al ili. 11 Kaj ili diris al li: Kion ni faru
kun vi, por ke la maro kvietiĝu por ni? ĉar la maro
fariĝis ĉiam pli kaj pli malkvieta. 12 Li respondis al ili:
Prenu min, kaj ĵetu min en la maron; tiam la maro
kvietiĝos por vi; ĉar mi scias, ke pro mi trafis vin ĉi
tiu granda ventego. 13 La homoj forte ekremis, por
reveni sur la sekteron; sed ili nenion povis fari, ĉar
la maro fariĝadis ĉiam pli kaj pli malkvieta kontraŭ
ili. 14 Tiam ili ekvokis al la Eternulo, kaj diris: Ni
petas Vin, ho Eternulo, ne do lasu nin perei pro la
animo de ĉi tiu homo, kaj ne metu sur nin la sangon
de senkulpulo; ĉar Vi, ho Eternulo, povas fari ĉion,
kion Vi volas. 15 Kaj ili prenis Jonan kaj ĵetis lin en la
maron; tiam la maro ĉesis koleri. 16 Tiam tiuj homoj
eksentis grandan timon antaŭ la Eternulo; kaj ili buĉis
oferon al la Eternulo kaj faris sanktajn promesojn. 17
Kaj la Eternulo pretigis grandan fiŝon, ke ĝi englutu
Jonan; kaj Jona restis en la interno de la fiŝo dum tri
tagoj kaj tri noktoj.

2 Kaj Jona ekpreĝis al la Eternulo, sia Dio, el la
interno de la fiŝo. 2 Kaj li diris: Kiam mi suferis, mi
vokis al la Eternulo, Kaj Li respondis al mi; El la ventro
de ŝeol mi kriis, Kaj Vi aŭskultis mian voĉon. **(Sheol
h7585)** 3 Vi ĵetis min en la profundegon, en la internon
de la maro, Kaj fluego min ĉirkaŭis; Ĉiuj Viaj ondegoj
kaj ondoj iris super min. 4 Kaj mi pensis: Mi estas
forpuŝita de antaŭ Viaj okuloj; Tamen mi rigardos
ankoraŭ Vian sanktan templon. 5 Ĉirkaŭis min akvo
ĝis la animo; Abismo min ĉirkaŭis; Junko kovris mian
kapon. 6 Mi falis malsupren ĝis la fundamento de la
montoj; La tero baris min por ĉiam per siaj rigliloj;
Sed Vi, ho Eternulo, mia Dio, elirigis mian vivon el
la pereo. 7 Kiam mia animo senfortiĝis en mi, mi
rememoris la Eternulon; Kaj mia preĝo alvenis al
Vi en Vian sanktan templon. 8 Tiuj, kiuj servas al
vantaĵoj, Senigas sin je favorkoreco. 9 Sed mi kun
danka voĉo alportos al Vi oferon; Kion mi promesis,
tion mi plenumos; Savo estas ĉe la Eternulo. 10 Kaj la
Eternulo ordonis al la fiŝo, kaj ĝi elvomis Jonan sur la
sekteron.

3 Kaj duafoje aperis al Jona vorto de la Eternulo,
dirante: 2 Leviĝu, iru en la grandan urbon Nineve,
kaj prediku al ĝi la predikon, kiun Mi diros al vi. 3
Tiam Jona leviĝis kaj iris en Nineven, konforme al
la vorto de la Eternulo. Nineve estis granda urbo
ĉe Dio; ĝi havis la grandecon de tri tagoj da irado.
4 Kiam Jona komencis la trairadon de la urbo kaj
trairis unu tagon, li vokis, kaj diris: Post kvardek tagoj
Nineve pereos. 5 La loĝantoj de Nineve ekkredis je
Dio, proklamis faston, kaj metis sur sin sakaĵon, de la
grandaj ĝis la malgrandaj inter ili. 6 Kiam tion aŭdis
la reĝo de Nineve, li leviĝis de sia trono, demetis de si
sian reĝan veston, kovris sin per sakaĵo, kaj sidiĝis
sur cindro. 7 Kaj li ordonis proklami en Nineve en
la nomo de la reĝo kaj de liaj altranguloj jenon: La
homoj kaj la brutoj, la bovoj kaj la ŝafoj, gustumu
nenion, ili ne paŝtiĝu kaj ne trinku akvon; 8 kaj la
homoj kaj la brutoj kovru sin per sakaĵo, kaj voku
forte al Dio, kaj ĉiu deturnu sin de sia malbona vojo
kaj de la perfortaĵoj de siaj manoj: 9 eble Dio bedaŭros,
kaj forlasos Sian flaman koleron, kaj ni ne pereos.
10 Kiam Dio vidis iliajn farojn, ke ili deturnis sin de
sia malbona vojo, Dio bedaŭris la malbonon, kiun Li
minacis fari al ili, kaj Li tion ne faris.

4 Tio tre forte ĉagrenis Jonan, kaj li ekkoleris. 2 Kaj li
ekpreĝis al la Eternulo, kaj diris: Ho Eternulo, tion
mi ja diris, kiam mi estis ankoraŭ en mia lando; kaj
tial mi preferis forkuri en Tarŝiŝon, ĉar mi sciis, ke Vi
estas Dio indulgema kaj kompatema, longepacienca
kaj tre favorkora, kaj bedaŭras malbonon. 3 Nun, ho
Eternulo, volu forpreni de mi mian animon; ĉar pli
bone por mi estas morti, ol vivi. 4 La Eternulo diris:
ĉu vi havas grandan ĉagrenon? 5 Jona eliris el la urbo,
sidiĝis oriente de la urbo, faris al si tie laŭbon, kaj
sidiĝis sub ĝi en la ombro, ĝis li vidos, kio estos kun
la urbo. 6 Dume Dio, la Eternulo, pretigis hederon,
kaj ĝi elkreskis super lian kapon, por ke li havu
ombron super sia kapo kaj liberiĝu el sia suferado.
Kaj Jona forte ekĝojis pro la hedero. 7 Sed kiam
leviĝis la matenruĝo de la sekvanta tago, Dio aperigis
vermon, kiu difektis la hederon, kaj ĝi forvelkis. 8 Kaj
kiam ekbrilis la suno, Dio aperigis bruligan orientan
venton, kaj la suno turmentis la kapon de Jona tiel,
ke li senfortiĝis kaj petis por si morton; li diris: Pli
bone por mi estas morti, ol vivi. 9 Tiam Dio diris al
Jona: ĉu vi havas grandan ĉagrenon pro la hedero? Li
respondis: Mi havas grandan ĉagrenon, eĉ ĝis deziro
al morto. 10 La Eternulo tiam diris: Vi domaĝas la
hederon, pri kiu vi ne laboris kaj kiun vi ne edukis, kiu
dum unu nokto elkreskis kaj dum unu nokto pereis;
11 kaj ĉu Mi povus ne domaĝi Nineven, la grandan
urbon, en kiu troviĝas pli ol cent dudek mil homoj,
ne povantaj distingi inter sia dekstra mano kaj sia
maldekstra, kaj krom tio multe da brutoj?

# Miĥa

1 Vorto de la Eternulo, kiu aperis al Miĥa, la
Moreŝetano, en la tempo de Jotam, Aĥaz, kaj
Ĥizkija, reĝoj de Judujo, kaj kiun li viziis pri Samario
kaj Jerusalem. 2 Aŭskultu, ĉiuj popoloj, atentu, ho
tero, kaj ĉio, kio estas sur ĝi! La Sinjoro, la Eternulo,
estu atestanto kontraŭ vi, la Sinjoro el Sia sankta
templo. 3 Ĉar jen la Eternulo eliras el Sia loko, iras
kaj paŝas sur la altaĵoj de la tero. 4 Kaj fandiĝas la
montoj sub Li, kaj la valoj disfendiĝas, kiel vakso
antaŭ fajro, kiel akvo, falanta de krutaĵo. 5 Ĉio ĉi tio
estas pro la krimo de Jakob kaj pro la pekoj de la
domo de Izrael. Kiu krimigis Jakobon? ĉu ne Samario?
Kiu aranĝis la altaĵojn de Judujo? ĉu ne Jerusalem? 6
Tial Mi faros Samarion ŝtonamaso sur la kampo, por
plantado de vinberoj; Mi disĵetos ĝiajn ŝtonojn en
la valon kaj nudigos ĝiajn fundamentojn. 7 Ĉiuj ĝiaj
idoloj estos disbatitaj, ĉiuj ĝiaj promalĉastaj donacoj
estos forbruligitaj per fajro, kaj ĉiujn ĝiajn statuojn Mi
ruinigos; ĉar per promalĉastaj donacoj ĝi ilin aranĝis,
kaj promalĉastaj donacoj ili fariĝos denove. 8 Pri
tio mi ploras kaj ĝemas, iras senŝue kaj nude; mi
krias plende, kiel la ŝakaloj, kaj estas malgaja, kiel
la strutoj. 9 Ĉar senespera estas ĝia plago, ĝi venis
ĝis Judujo, atingis ĝis la pordego de mia popolo, ĝis
Jerusalem. 10 Ne diru tion en Gat, ne ploru laŭte; en
Bet-Leafra rulu vin en cindro. 11 Foriru, ho loĝantino
de Ŝafir, en nudeco kaj honto; ne eliros la loĝantino
de Caanan; la plorado en Bet-Ecel ne permesos al vi
tie halti. 12 Afliktiĝas pri sia bono la loĝantino de
Marot; ĉar malfeliĉo venis de la Eternulo al la pordego
de Jerusalem. 13 Jungu al la ĉaro kurĉevalojn, ho
loĝantino de Laĥiŝ; vi estas la komenco de pekoj de la
filino de Cion, ĉar ĉe vi oni trovis la krimojn de Izrael.
14 Tial vi sendos donacojn en Moreŝet-Gaton; sed la
domoj de Aĥzib trompos la reĝojn de Izrael. 15 Mi
alkondukos al vi ankoraŭ la posedonton, ho loĝantino
de Mareŝa; ĝis Adulam venos la gloro de Izrael. 16
Detondu viajn harojn kaj razu vin pro viaj amataj filoj;
larĝigu vian kalvon kiel aglo, ĉar ili estos forkaptitaj
for de vi.

2 Ve al tiuj, kiuj meditas pri pekoj kaj intencas
malbonagojn sur sia kuŝejo, por plenumi ilin
matene, kiam ilia mano havas forton. 2 Ili ekdeziras
kampojn kaj rabas ilin, domojn kaj forprenas ilin;
ili premas homon kaj lian domon, viron kaj lian
posedaĵon. 3 Tial tiele diras la Eternulo: Jen Mi
entreprenas kontraŭ tiu gento tian malbonon, de kiu
vi ne liberigos vian kolon kaj ne iros kun levita kapo;
ĉar tio estos tempo malfacila. 4 En tiu tempo oni
parolos pri vi parabolon, kaj oni prikantos vin per
plorkanto, dirante: Ni estas tute ruinigitaj; la posedaĵo
de mia popolo transiris al alia; kiamaniere povas
reveni al ni niaj kampoj, se ili jam estas disdividitaj! 5
Tial oni ne mezuros por vi per ŝnuro terpecon lote
en la komunumo de la Eternulo. 6 Ne prediku, ho
predikantoj; oni ne devas prediki al tiuj, kiuj ne volas
eviti malhonoron. 7 Ho, la tiel nomata domo de Jakob!
ĉu malgrandiĝis la spirito de la Eternulo? ĉu tiaj estas
Liaj agoj? Ĉu ne estas bonfaraj Miaj vortoj por tiu,
kiu kondutas ĝuste? 8 Sed Mia popolo leviĝis kiel
malamiko; vi rabas la supran kaj la malsupran vestojn
de la trankvilaj preterirantoj, kvazaŭ ili revenus de
batalo. 9 La virinojn de Mia popolo vi elpelas el
iliaj amataj loĝejoj; de iliaj junaj infanoj vi forprenas
por ĉiam Mian ornamon. 10 Leviĝu kaj foriru, ĉar ĉi
tie vi ne havos ripozon; pro sia malpureco la lando
estos kruele ruinigita. 11 Se iu falsanimulo elpensus
mensogon, kaj dirus: Mi predikos al vi pri vino kaj
ebriigaĵo, li estus ĝusta predikanto por ĉi tiu popolo. 12
Tamen Mi kolektos vin tutan, ho Jakob, Mi kolektos la
restaĵon de Izrael, Mi kunigos ilin kiel ŝafojn en ŝafejo;
kiel grego en gregejo ili ekbruos de multhomeco. 13
Murrompanto iros antaŭ ili; ili trarompos la baron,
trapasos la pordegon, kaj eliros el ĝi; ilia reĝo iros
antaŭ ili, kaj la Eternulo estos ilia antaŭgvidanto.

3 Mi diris: Aŭskultu, ho ĉefoj de Jakob kaj estroj de la
domo de Izrael! Vi devas ja scii la juron; 2 tamen vi
malamas la bonon, amas la malbonon; vi deŝiras de ili
ilian haŭton kaj la karnon de iliaj ostoj. 3 Kaj kiam ili
manĝas la karnon de mia popolo, deŝiras de ili ilian
haŭton, rompas kaj dispecigas iliajn ostojn kvazaŭ
por poto kaj la karnon kvazaŭ por kaldrono: 4 tiam
ili krios al la Eternulo; sed Li ne respondos al ili, Li
kaŝos antaŭ ili Sian vizaĝon en tiu tempo, ĉar ili faris
siajn malbonajn agojn. 5 Tiele diras la Eternulo pri
la profetoj, kiu erarigas mian popolon, kiuj mordas
per siaj dentoj kaj predikas pacon, kaj kontraŭ tiu,
kiu ne donas ion en ilian buŝon, ili predikas militon:
6 Tial estos ĉe vi nokto, sed ne vizioj, mallumo, sed
ne antaŭdiroj; subiros la suno super la profetoj, kaj

mallumiĝos super ili la tago. 7 Hontos tiuj viziistoj,
mokindaj fariĝos la antaŭdiristoj, kaj ili ĉiuj fermos
sian buŝon; ĉar ili ne havas respondon de Dio. 8 Sed
mi estas plena de forto de la spirito de la Eternulo, de
praveco kaj kuraĝo, por montri al Jakob lian krimon
kaj al Izrael lian pekon. 9 Aŭskultu ĉi tion, ho ĉefoj
de la domo de Jakob kaj estroj de la domo de Izrael,
kiuj abomenas juron kaj kurbigas ĉion rektan, 10
kiuj konstruas Cionon per sango kaj Jerusalemon
per maljustaĵoj. 11 Ĝiaj ĉefoj juĝas pro subaĉeto, ĝiaj
pastroj instruas pro pago, kaj ĝiaj profetoj antaŭdiras
pro mono; tamen ili apogas sin sur la Eternulo, kaj
diras: La Eternulo estas ja meze de ni, ne trafos nin
malfeliĉo. 12 Tial pro vi Cion estos plugita kiel kampo,
Jerusalem fariĝos ruinaĵo, kaj la monto de la templo
fariĝos arbara altaĵo.

**4** Sed iam en la tempo estonta la monto de la domo
de la Eternulo staros kiel ĉefo inter la montoj, kaj
ĝi estos pli alta ol ĉiuj altaĵoj; kaj fluos al ĝi popoloj. 2
Kaj iros multaj nacioj, kaj diros: Venu, ni iru supren
sur la monton de la Eternulo kaj en la domon de Dio
de Jakob, por ke Li instruu nin pri Siaj vojoj kaj ke ni
iru laŭ Lia irejo; ĉar el Cion eliros la instruo, kaj la
vorto de la Eternulo el Jerusalem. 3 Kaj Li juĝos inter
multe da popoloj, kaj Li decidos pri potencaj nacioj
en landoj malproksimaj; kaj ili forĝos el siaj glavoj
plugilojn kaj el siaj lancoj rikoltilojn; ne levos nacio
glavon kontraŭ nacion, kaj oni ne plu lernos militon.
4 Sed ĉiu sidos sub sia vinberujo kaj sub sia figarbo, kaj
neniu timigos; ĉar la buŝo de la Eternulo Cebaot tion
diris. 5 Ĉiuj popoloj iros ĉiu en la nomo de sia dio, sed
ni irados en la nomo de la Eternulo, nia Dio, ĉiam kaj
eterne. 6 En tiu tago, diras la Eternulo, Mi kolektos la
lamulojn, kunvenigos la dispelitojn, kaj tiujn, kiujn Mi
suferigis. 7 Kaj la lamulojn Mi faros restantaro, kaj la
suferintojn potenca nacio, kaj la Eternulo reĝos super
ili sur la monto Cion de nun kaj eterne. 8 Kaj vi, ho
turo de la grego, fortikaĵo de la filino de Cion, al vi
venos, revenos la antaŭa reĝado, la regno de la filino
de Jerusalem. 9 Kial vi nun ploras tiel laŭte? Ĉu vi ne
havas reĝon? ĉu pereis viaj konsilistoj, ke vin atakis
doloroj kiel naskantinon? 10 Suferu, kaj havu dolorojn,
ho filino de Cion, kiel naskantino; ĉar nun vi eliros el
la urbo kaj loĝos sur la kampo kaj venos ĝis Babel;
tie vi estos savata; tie la Eternulo liberigos vin el la
mano de viaj malamikoj. 11 Nun kolektiĝis kontraŭ
vi multe da nacioj, kiuj diras: Ĝi malsanktiĝu, kun
ĝuo ni rigardu Cionon! 12 Sed ili ne scias la pensojn
de la Eternulo, ili ne komprenas Lian intencon, ke Li
kolektis ilin kiel garbojn en la draŝejon. 13 Leviĝu kaj
draŝu, ho filino de Cion, ĉar vian kornon Mi faros fera,
viajn hufojn Mi faros kupraj, kaj vi dispremos multe
da popoloj, vi konsekros al la Eternulo ilian akiritaĵon,
kaj ilian havaĵon al la Sinjoro de la tuta tero.

**5** Nun armu vin, ho batalistino! oni sieĝos nin; per
vergo oni frapos la vangon de la juĝisto de Izrael. 2
Kaj vi, ho Bet-Leĥem Efrata, kiu estas malgranda inter
la milejoj de Judujo, el vi eliros al Mi tiu, kiu devas esti
reganto en Izrael kaj kies deveno estas de tempo tre
antikva. 3 Li lasos ilin ĝis la tempo, kiam la naskontino
estos naskinta; tiam liaj ceteraj fratoj revenos al la
idoj de Izrael. 4 Li stariĝos kaj paŝtos kun la forto de
la Eternulo, kun la majesto de la nomo de la Eternulo,
lia Dio, kaj tiuj konvertiĝos; ĉar tiam li fariĝos granda
ĝis la randoj de la tero. 5 Kaj li estos paco. Kiam la
Asiriano venos en nian landon kaj enpaŝos en niajn
palacojn, ni starigos kontraŭ li sep paŝtistojn kaj ok
eminentulojn. 6 Ili paŝtos la landon Asirian per glavo
kaj la landon de Nimrod per iliaj lancoj; kaj li savos nin
kontraŭ la Asiriano, kiam ĉi tiu venos en nian landon
kaj enpaŝos en niajn limojn. 7 Kaj la restaĵo de Jakob
estos inter multe da popoloj kiel roso de la Eternulo,
kiel pluvaj gutoj sur herbo; kaj li ne esperos je homo
kaj ne fidos homidojn. 8 Kaj la restaĵo de Jakob estos
inter la nacioj, meze de multaj popoloj, kiel leono
inter la bestoj de la arbaro, kiel leonido meze de
ŝafaroj, kiu dispremas pasante, disŝiras, kaj neniu
povas savi. 9 Leviĝos via mano super viaj kontraŭuloj,
kaj ĉiuj viaj malamikoj ekstermiĝos. 10 En tiu tago,
diras la Eternulo, Mi ekstermos viajn ĉevalojn ĉe vi
kaj pereigos viajn ĉarojn; 11 Mi ekstermos la urbojn
de via lando kaj detruos ĉiujn viajn fortikaĵojn; 12
Mi ekstermos ĉe vi la sorĉistojn, kaj vi ne plu havos
aŭguristojn; 13 Mi ekstermos el via mezo viajn idolojn
kaj viajn statuojn, kaj vi ne plu adorkliniĝos antaŭ la
faritaĵo de viaj manoj; 14 Mi elŝiros el via mezo viajn
sanktajn stangojn kaj ekstermos viajn urbojn. 15 Kaj
en kolero kaj indigno Mi faros venĝon super la nacioj,
kiuj ne volos obei.

**6** Aŭskultu, kion diras la Eternulo: Leviĝu, havu juĝan
disputon kun la montoj, kaj la montetoj aŭdu vian
voĉon. 2 Aŭskultu, ho montoj, la juĝan disputon de la

Eternulo, kaj ankaŭ vi, ho potencaj fundamentoj de la
tero; ĉar la Eternulo havas juĝan disputon kun Sia
popolo, kaj al Izrael Li volas doni moralinstruon. 3 Ho
Mia popolo! kion Mi faris al vi, kaj per kio Mi faris al
vi maljustaĵon? respondu al Mi. 4 Mi elkondukis ja vin
el la lando Egipta, kaj el la domo de sklaveco Mi vin
elaĉetis, kaj Mi sendis antaŭ vin Moseon, Aaronon,
kaj Mirjamon. 5 Ho Mia popolo! rememoru, kion
intencis Balak, reĝo de Moab, kaj kion respondis al
li Bileam, filo de Beor; de Ŝitim ĝis Gilgal, por ke vi
sciu la bonfarojn de la Eternulo. 6 Kun kio mi povas
stariĝi antaŭ la Eternulo, kliniĝi antaŭ Dio en la alto?
ĉu mi stariĝu antaŭ Li kun bruloferoj, kun jaraĝaj
bovidoj? 7 Ĉu al la Eternulo faros plezuron miloj da
ŝafoj aŭ sennombraj torentoj da oleo? ĉu mi donu
mian unuenaskiton pro mia krimo, la frukton de mia
ventro pro la peko de mia animo? 8 Estas dirite al vi,
ho homo, kio estas bona kaj kion la Eternulo postulas
de vi: nur agi juste, ami bonfarojn, kaj esti modesta
antaŭ via Dio. 9 La voĉo de la Eternulo vokas al la
urbo, kaj saĝuloj timas Vian nomon. Humiliĝu antaŭ
la puno, kaj antaŭ Tiu, kiu ĝin destinis. 10 Ankoraŭ
restas en la domo de malpiulo trezoroj de malpieco,
kaj malbeninda malĝusta mezurilo. 11 Ĉu Mi povas
aprobi falsan pesilon kaj trompajn pezilojn en la
saketo? 12 Ĉar la riĉuloj de la urbo estas plenaj de
rabemo, kaj ĝiaj loĝantoj parolas mensogon, kaj la
lingvo de ilia buŝo estas falsaĵo, 13 tial Mi dolorige vin
frapos per dezertigo pro viaj pekoj. 14 Vi manĝos,
sed ne satiĝos sata; doloron pro malsato vi havos en
via interno; vi kaŝos, sed ne povos konservi; kaj kion
vi konservos, tion Mi transdonos al la glavo. 15 Vi
semos, sed vi ne rikoltos; vi premos olivojn, sed vi ne
ŝmiros vin per oleo; vi premos vinberojn, sed vi ne
trinkos vinon. 16 Konserviĝis ĉe vi la moroj de Omri
kaj ĉiuj faroj de la domo de Aĥab, kaj vi sekvas iliajn
konsilojn, por ke Mi faru vin dezerto, viajn loĝantojn
mokataĵo, kaj por ke vi portu sur vi la malhonoron de
Mia popolo.

7 Ho ve al mi! ĉar mi fariĝis kiel kolektanto de
someraj fruktoj kaj de restaĵo de vinberoj, kiu ne
trovas beron manĝeblan; bonan maturan frukton
deziras mia animo. 2 Malaperis piuloj en la lando, kaj
ne troviĝas justulo inter la homoj; ĉiuj insidas, por
verŝi sangon, unu la alian ĉasas, por pereigi lin. 3 Por
pravigi malbonan faron, la estro postulas donacon kaj
la juĝisto pagon; la altrangulo parolas, kion li volas,
kaj konfuzas la aferojn. 4 La plej bona inter ili estas
kiel dornarbetaĵo, la justulo estas kiel pikaĵa barilo.
Sed venos la tago de Via esploro, de Via puno; tiam ili
ne scios, kion fari. 5 Ne kredu al proksimulo, ne fidu
amikon; kontraŭ tiu, kiu kuŝas ĉe via brusto, gardu la
aperturon de via buŝo; 6 ĉar filo malhonoras patron,
filino batalas kontraŭ sia patrino, bofilino kontraŭ sia
bopatrino; la domanoj de homo estas liaj malamikoj. 7
Sed mi rigardas al la Eternulo, mi fidas la Dion de mia
savo; mia Dio min aŭskultos. 8 Ne ĝoju pri mi, mia
malamikino: kvankam mi falis, mi releviĝos; kvankam
mi estas en mallumo, la Eternulo estas lumo por mi.
9 La koleron de la Eternulo mi portos, ĉar mi pekis
antaŭ Li, ĝis Li esploros mian aferon kaj faros juĝon
super mi; tiam Li elkondukos min en lumon, kaj mi
vidos Lian bonecon. 10 Kaj tion vidos mia malamikino,
kaj honto ŝin kovros pro tio, ke ŝi diris al mi: Kie estas
la Eternulo, via Dio? Miaj okuloj ŝin rigardos tiam,
kiam ŝi estos piedpremata, kiel koto sur la stratoj. 11
En tiu tempo, kiam viaj muroj estos rekonstruataj,
en tiu tempo la leĝo disvastiĝos malproksime. 12 En
tiu tempo oni venos al vi el Asirio kaj el la urboj
Egiptaj, de Egiptujo ĝis la Rivero, de maro ĝis maro,
kaj de monto ĝis monto. 13 La lando estos dezerta
pro ĝiaj loĝantoj, pro la fruktoj de iliaj agoj. 14 Paŝtu
per Via bastono Vian popolon, Vian heredan ŝafaron,
kiu loĝas izolite en la arbaro, meze de Karmel; ili
paŝtiĝu en Baŝan kaj Gilead, kiel en la tempo antikva.
15 Kiel en la tempo de via eliro el la lando Egipta,
Mi montros al li mirindaĵojn. 16 La nacioj vidos kaj
hontos, malgraŭ ilia tuta potenco; ili metos la manon
sur la buŝon, iliaj oreloj surdiĝos. 17 Ili lekos polvon,
kiel serpento; kiel la rampaĵoj sur la tero, kun tremado
ili elvenos el siaj kaŝejoj; ili ektimos la Eternulon, nian
Dion, ili ekrespektos Vin. 18 Kiu estas Dio simila al Vi,
kiu pardonas malbonagon kaj preterlasas la kulpon de
la restaĵo de Sia heredaĵo, ne konservas por ĉiam Sian
koleron, ĉar Li amas bonfari? 19 Li denove kompatos
nin, malgrandigos niajn malbonagojn, kaj ĵetos en
la profundon de la maro ĉiujn niajn pekojn. 20 Vi
montros fidelecon al Jakob, favorkorecon al Abraham,
kiel Vi ĵuris al niaj patroj en la tempo antikva.

# Naĥum

1 Profetaĵo pri Nineve, libro de vizio de Naĥum,
la Elkoŝano. 2 La Eternulo estas Dio severa kaj
venĝanta; la Eternulo estas venĝanto kaj koleranto; la
Eternulo venĝas al Siaj malamikoj kaj ne forgesas pri
Siaj kontraŭuloj. 3 La Eternulo estas longepacienca,
kaj potenca per Sia forto, kaj neniu estas senkulpa
antaŭ Li; la vojo de la Eternulo estas en fulmotondro
kaj ventego, kaj nubo estas la polvo sub Liaj piedoj.
4 Kiam Li ekparolas kolere al la maro, Li elsekigas
ĝin, kaj ĉiujn riverojn Li senakvigas; malgajiĝas Baŝan
kaj Karmel, kaj velkas ĉio, kio floras sur Lebanon. 5
La montoj tremas antaŭ Li, la montetoj disfandiĝas;
skuiĝas antaŭ Li la tero, la mondo kaj ĉiuj ĝiaj loĝantoj.
6 Kiu povas kontraŭstari al Lia indigno? kaj kiu povas
elteni la flamon de Lia kolero? Lia indigno disverŝiĝas
kiel fajro; la rokoj disfalas antaŭ Li. 7 La Eternulo
estas bona, forta apogo en tago de malfeliĉo; kaj Li
konas tiujn, kiuj fidas Lin. 8 Dronigante per inundo, Li
faras finon al loko, kaj Liajn malamikojn persekutas
mallumo. 9 Kion vi pensas pri la Eternulo? Li faros la
ekstermon, la malfeliĉo ne bezonas veni duafoje. 10
Ĉar, interplektiĝinte kiel dornoj kaj ebriaj de drinkado,
ili estos ekstermitaj, kiel tute seka pajlo. 11 El vi
eliris tiu, kiu havis malbonan intencon kontraŭ la
Eternulo kaj kiu estas malica konsilanto. 12 Tiele
diras la Eternulo: Kvankam ili estas unuanimaj kaj
multaj, ili tamen estos dishakitaj kaj malaperos; sed
vin, kiun Mi humiligis, Mi ne plu humiligos. 13 Nun
Mi rompos lian jugon, kiu estas sur vi, kaj Mi disŝiros
viajn ligilojn. 14 Sed pri vi la Eternulo decidis: Ne plu
restos semo portanta vian nomon; el la domo de viaj
dioj Mi ekstermos la idolojn kaj statuojn; Mi signos sur
via tombo, ke vi fariĝis senvalora. 15 Jen sur la montoj
estas la piedoj de sciiganto, kiu proklamas pacon!
Festu, ho Judujo, viajn festojn, plenumu viajn sanktajn
promesojn; ĉar ne plu iros tra vi la sentaŭgulo; li estas
tute ekstermita.

2 Disŝetanto iras kontraŭ vin; fortikigu viajn
fortikaĵojn, gardu la vojon, armu viajn lumbojn,
fortigu vin kiel eble plej potence. 2 Ĉar la Eternulo
restarigos la majeston de Jakob, kiel ankaŭ la majeston
de Izrael; ĉar la ruinigantoj ilin ruinigis kaj ekstermis
iliajn vinberbranĉojn. 3 La ŝildo de liaj herooj estas
ruĝigita; liaj militistoj estas kiel en purpuro; kiel
fajro brilas la ĉaroj en la tago de lia armiĝo; la lancoj
ŝanceliĝas. 4 Sur la stratoj rapide ruliĝas la ĉaroj,
bruas sur la placoj; ili aspektas kiel torĉoj, brilas kiel
fulmoj. 5 Li vokas siajn fortulojn, sed ili falpuŝiĝos
dum sia irado; ili rapidas al la murego kaj preparas
defendon. 6 La pordegoj ĉe la akvo malfermiĝos,
kaj la palaco cedos. 7 Decidita estas ĝia kapto kaj
forkonduko, kaj ĝiaj sklavinoj ĝemos kiel kolomboj
kaj batos sian bruston. 8 Nineve estas de ĉiam kiel
baseno da akvo; sed nun ĝi forkuras: Haltu, haltu!
sed neniu revenas. 9 Disrabu arĝenton, disrabu oron;
senfinaj estas la trezoroj, estas multege da diversaj
valoraĵoj. 10 Prirabita kaj plene ruinigita ĝi estos; la
koro svenas, la genuoj tremas; ĉies lumboj senfortiĝis,
kaj ĉies vizaĝoj nigriĝis. 11 Kie nun estas la loĝejo de
la leonoj, kaj tiu paŝtejo de leonidoj, kie iradis leono,
leonino, kaj leonidoj, kaj neniu ilin timigis? 12 La
leono disŝiradis sufiĉon por siaj idoj, sufokadis por siaj
leoninoj, plenigadis siajn kavernojn per kaptaĵo kaj
siajn nestegojn per disŝiritaĵo. 13 Jen Mi iras kontraŭ
vin, diras la Eternulo Cebaot, kaj Mi forbruligos en
fumo viajn ĉarojn, kaj glavo ekstermos viajn leonidojn;
Mi ĉesigos sur la tero vian disŝiradon, kaj oni ne plu
aŭdos la voĉon de viaj sendatoj.

3 Ve al la urbo sangavida, kiu estas plena de trompoj
kaj raboj, kaj ne volas ĉesigi la rabadon! 2 Oni aŭdas
la sonadon de vipoj, la sonadon de bruantaj radoj;
blekas ĉevalo, saltas ĉaro; 3 moviĝas rajdantoj, brilas
glavoj, fulmas lancoj; estas multe da mortigitoj kaj
amasoj da kadavroj; sennombraj estas la kadavroj, oni
falpuŝiĝas sur ili. 4 Tio estas pro la granda malĉastado
de la malĉastistino, kiu ĉarmas per sia beleco, estas
lerta sorĉistino, kaj vendas naciojn per sia malĉastado
kaj gentojn per sia sorĉado. 5 Jen Mi iras kontraŭ vin,
diras la Eternulo Cebaot, kaj Mi levos ĝis via vizaĝo
la randojn de via vesto, kaj Mi montros al la nacioj
vian nudecon kaj al la regnoj vian malhonoron. 6
Mi ĵetos sur vin abomenindaĵojn, Mi malhonoros vin
kaj faros vin mokataĵo. 7 Ĉiu, kiu vidos vin, forkuros
de vi, kaj diros: Ruinigita estas Nineve; kiu bedaŭros
ĝin? kie mi povas serĉi por vi konsolantojn? 8 Ĉu vi
estas pli bona ol No-Amon, kiu troviĝas inter riveroj,
estas ĉirkaŭata de akvo, kaj kies forto kaj murego
estis la maro? 9 Etiopujo kaj la senfina Egiptujo estis
ĝia forto, la Putidoj kaj Luboj donadis al vi helpon; 10
tamen ĝi ankaŭ estas elpatrujigita kaj forkaptita; eĉ

ĝiaj malgrandaj infanoj estas frakasitaj en la komenco
de ĉiuj stratoj; pri ĝiaj eminentuloj oni lotis, kaj
ĉiujn ĝiajn altrangulojn oni katenis. 
11 Tiel ankaŭ vi
ebriiĝos kaj kaŝos vin kaj serĉos defendon kontraŭ la
malamikoj. 
12 Ĉiuj viaj fortikaĵoj estas kiel figarboj
kun maturaj fruktoj; se oni ekskuas ilin, ili falas en
la buŝon de manĝonto. 
13 Jen via popolo estas ĉe vi
kiel virinoj; al viaj malamikoj larĝe malfermiĝos la
pordegoj de via lando; fajro ekstermos viajn riglilojn.
14 Provizu al vi akvon por la tempo de sieĝo; fortigu
viajn fortikaĵojn; iru en kalkon, knedu argilon, faru
fortajn brikojn. 
15 Tamen tie la fajro vin konsumos,
glavo vin ekstermos, formanĝos vin kiel skarabo, se vi
eĉ estus grandnombra kiel skaraboj, grandnombra kiel
akridoj. 
16 Vi havas pli da komercistoj, ol la steloj de la
ĉielo; sed ili diskuros kiel akridoj kaj forflugos. 
17 Viaj
taĉmentoj estas kiel akridoj, kaj viaj taĉmentestroj
estas kiel lokustoj, kiuj dum la malvarmo kaŝas sin en
fendoj, kaj kiam la suno ekbrilas, ili disflugas tiel, ke
oni ne scias, kie ili estas. 
18 Dormas viaj paŝtistoj, ho
reĝo de Asirio, kuŝas viaj fortuloj; via popolo estas
disĵetita sur la montoj, kaj troviĝas neniu, kiu ĝin
kolektus. 
19 Ne resaniĝas via vundo, doloriga estas via
ulcero; ĉiu, kiu aŭdas la sciigon pri vi, aplaŭdas pri vi;
ĉar kiun ne trafis senĉese via malboneco?

# Ĥabakuk

1 Profetaĵo, kiun laŭvizie eldiris la profeto Ĥabakuk. 2
Ĝis kiam, ho Eternulo, mi krios, kaj Vi ne aŭskultos,
mi krios al Vi pri perfortaĵo, kaj Vi ne helpos? 3 Kial
Vi devigas min vidi maljustaĵon, rigardi mizeraĵon?
Rabado kaj perfortado estas antaŭ mi, leviĝas disputoj
kaj malpaco. 4 Tial la instruo perdis sian forton, la
justeco neniam venkas; ĉar la malvirtulo superfortas
la virtulon, tial la rezultoj de juĝo estas malĝustaj.
5 Rigardu la naciojn, rigardu, kaj vi forte miros; ĉar
en via tempo Mi faros ion, kion vi ne kredus, se oni
rakontus al vi. 6 Ĉar jen Mi levos la Ĥaldeojn, nacion
kruelan kaj lertan, kiu trairos la tutan larĝon de la
tero, por ekposedi loĝejojn, kiuj ne apartenas al ĝi.
7 Terura kaj timinda ĝi estas; ĝia juĝado kaj regado
dependas de ĝi mem. 8 Pli rapidaj ol leopardoj estas
ĝiaj ĉevaloj, kaj pli lertaj ol lupoj vespere; en grandaj
amasoj venas ĝiaj rajdantoj de malproksime, flugas
kiel aglo, kiu rapidas al manĝaĵo. 9 Ĉiuj ili venas por
rabi; kiel vento orienta ili direktas sin, kien ili volas;
kaj ili kolektas kaptitojn kiel sablon. 10 Reĝojn ili
mokas, regantoj estas ridataĵo por ili; ĉiun fortikaĵon
ili mokas; ili ŝutas teron, kaj venkoprenas. 11 Tiam
ŝanĝiĝas ilia spirito, transiras kaj fariĝas peka, kaj
ilia forto fariĝas ilia dio. 12 Sed Vi estas ja de ĉiam,
ho Eternulo, mia sankta Dio! ne lasu nin morti. Vi,
ho Eternulo, aperigis ilin por juĝo; Vi, ho nia Roko,
destinis ilin por puni. 13 Viaj okuloj estas tro puraj,
por vidi malbonon, kaj rigardi maljustaĵon Vi ne
povas; kiel do Vi rigardas malhonestulojn, kaj silentas,
kiam malpiulo englutas tiun, kiu estas pli virta ol
li? 14 Kial Vi faras la homojn kiel fiŝoj en la maro,
kiel rampaĵoj, kiuj ne havas reganton? 15 Ĉiujn ili
tiras per fiŝhoko, kaptas per sia reto, amasigas per
sia fiŝreto; kaj tial ili ĝojas kaj triumfas. 16 Tial ili
alportas oferojn al sia reto, incensas al sia fiŝreto; ĉar
per ĉi tiuj grasiĝis ilia parto kaj boniĝis ilia manĝaĵo.
17 Ĉu por tio ili devas ĵetadi sian reton kaj senĉese
mortigadi naciojn senindulge?

2 Sur mia gardista posteno mi staris; kaj, stariĝinte
sur turo, mi observis, por vidi, kion Li diros al mi
kaj kion mi devas respondi al la riproĉo kontraŭ mi.
2 Kaj la Eternulo ekparolis al mi, kaj diris: Enskribu
la vizion, kaj desegnu bone sur la tabeloj, por ke
leganto povu facile tralegi. 3 Ĉar la vizio koncernas
tempon difinitan kaj parolas pri la fino, sed ĝi ne
mensogas; se ĝi prokrastiĝus, atendu ĝin, ĉar ĝi nepre
plenumiĝos, ne estos fordecidita. 4 Vidu, kiu estas
malhumila, ties animo ne estos trankvila en li; sed
virtulo vivos per sia fideleco. 5 La vino trompas viron
fieran, kaj li ne humiliĝas; li larĝigas sian animon
kiel Ŝeol, kaj kiel la morto li estas nesatigebla, li
kolektas al si ĉiujn naciojn kaj kaptas al si ĉiujn
popolojn. (Sheol h7585) 6 Sed ili ja ĉiuj parolos pri li
alegorion kaj mokan enigmon, kaj diros: Ve al tiu, kiu
tro multigas al si fremdaĵon sen fino kaj metas sur
sin tro grandan ŝarĝon de ŝuldoj! 7 Subite ja leviĝos
viaj pikontoj kaj vekiĝos viaj puŝontoj, kaj vi fariĝos
ilia rabataĵo. 8 Ĉar vi prirabis multe da nacioj, tial
ankaŭ vin prirabos la ceteraj popoloj, pro la sango de
homoj, pro la premado de la lando, de la urbo, kaj
de ĉiuj ĝiaj loĝantoj. 9 Ve al tiu, kiu kolektas por sia
domo maljustan akiraĵon, por aranĝi alte sian neston,
por defendi sin kontraŭ mano de malbonulo! 10 Vi
elpensis malhonoron por via domo, disbatante multe
da popoloj kaj pekigante vian animon. 11 La ŝtonoj el
la muroj krias, kaj la lignaj traboj respondas al ili.
12 Ve al tiu, kiu konstruas urbon per sangoverŝado
kaj pretigas fortikaĵon per maljusteco! 13 Tio venas
ja de la Eternulo Cebaot, ke la popoloj klopodas por
la fajro kaj la gentoj lacigas sin vane. 14 Ĉar la tero
pleniĝos de konado de la gloro de la Eternulo, kiel la
akvo plenigas la maron. 15 Ve al vi, kiu drinkigas sian
proksimulon, por elverŝi vian koleron, kaj ebriigas lin,
por vidi lian honton! 16 Vi satiĝis per honto anstataŭ
per honoro; drinku do ankaŭ vi, kaj kovru vin per
honto; ankaŭ al vi venos la kaliko el la dekstra mano
de la Eternulo, kaj neniigo de via gloro. 17 Ĉar via
perforteco sur Lebanon falos sur vin, kaj atakate de
bestoj vi estos terurata pro la sango de homoj, pro
la premado de la lando, de la urbo, kaj de ĉiuj ĝiaj
loĝantoj. 18 Kion helpos la skulptaĵo, kiun skulptis la
artisto, la fanditaĵo kaj malvera instruanto, kvankam
la majstro fidis sian propran faritaĵon, farante mutajn
idolojn? 19 Ve al tiu, kiu diras al ligno: Leviĝu, kaj
al muta ŝtono: Vekiĝu! Ĉu ĝi povas instrui? ĝi estas
ja tegita per oro kaj arĝento, sed havas en si nenian
spiriton. 20 Sed la Eternulo estas en Sia sankta templo;
la tuta tero silentu antaŭ Li!

3 Preĝo de la profeto Ĥabakuk laŭ maniero de
psalmoj. 2 Ho Eternulo, mi aŭdis la sciigon pri Vi,

kaj mi ektimis. Ho Eternulo, vivigu Vian faritaĵon en
la mezo de la jaroj, Montru en la mezo de la jaroj, Ke
eĉ en kolero Vi memoras pri kompato. 3 Dio venas
de Teman, La Sanktulo de la monto Paran. (Sela) Lia
majesto kovras la ĉielon, Kaj Lia gloro plenigas la
teron. 4 Lia brilo estas kiel hela lumo, Radioj iras el
Lia mano, Kaj tie estas kaŝita Lia potenco. 5 Antaŭ Li
iras pesto, Kaj fajro sekvas Liajn piedojn. 6 Li stariĝis,
kaj ekmezuris la teron; Li ekrigardis, kaj tremigis
la naciojn; Dissaltis eternaj montoj, Kliniĝis eternaj
montetoj, Kiam Li ekpaŝis kiel en la tempo antikva. 7
En mizera stato mi vidis la tendojn de Kuŝan; Skuiĝis la
tapiŝoj de la lando Midjan. 8 Ĉu kontraŭ riveroj koleris
la Eternulo? Ĉu kontraŭ la riveroj Vi ekflamiĝis, Aŭ
ĉu kontraŭ la maro estis Via indigno, Ke Vi ekrajdis
sur Viaj ĉevaloj, Ekveturis sur Viaj venkaj ĉaroj? 9 Vi
eltiris Vian pafarkon, Konforme al ĵura promeso, kiun
Vi donis al la triboj. (Sela) Per riveroj Vi dividis la
teron. 10 Ektremis la montoj, kiam ili Vin vidis; La
fluo de la akvo pasis, La abismo ekbruis, La altaĵo levis
siajn manojn. 11 La suno kaj la luno haltis sur sia loko;
Kun brilo iras Viaj sagoj, Kun fulmo Viaj lancoj. 12 Kun
kolero Vi paŝas sur la tero, Kun indigno Vi piedpremas
naciojn. 13 Vi elpaŝis, por helpi al Via popolo, Por
helpi al Via sanktoleito. Vi frakasas la supron de la
domo de malpiulo, Nudigas la fundamenton ĝis la
kolo. (Sela) 14 Vi trapikis per liaj lancoj la kapojn
de liaj taĉmentestroj, Kiam ili sin ĵetis ventege, por
dispeli min kun ĝojo, Kvazaŭ englutante mizerulon
kaŝe. 15 Vi paŝis kun Viaj ĉevaloj tra la maro, Tra la
ŝlimo de granda akvo. 16 Mi aŭdis, kaj mia interno
ekskuiĝis; Pro la bruo ektremis miaj lipoj, Putro venis
en miajn ostojn, kaj la loko sub mi ekŝanceliĝis; Dume
mi devas esti trankvila en la tago de malfeliĉo, Kiam
sur mian popolon iras ĝia atakanto. 17 Kiam la figarbo
ne floros, La vinberbranĉoj ne donos fruktojn, La
olivarbo rifuzos sian laboron, La plugokampoj ne
donos manĝaĵon, La ŝafoj estos forkaptitaj el la ŝafejo,
Kaj en la staloj ne troviĝos bovoj: 18 Eĉ tiam mi ĝojos
pri la Eternulo, Mi estos gaja pri la Dio de mia savo.
19 La Eternulo, la Sinjoro, estas mia forto; Li faras
miajn piedojn kiel ĉe cervo, Kaj venigas min sur miajn
altaĵojn. Al Li, la Venkanto, iru miaj kantoj.

# Cefanja

**1** Vorto de la Eternulo, kiu aperis al Cefanja, filo de
Kuŝi, filo de Gedalja, filo de Amarja, filo de Ĥizkija,
en la tempo de Joŝija, filo de Amon, reĝo de Judujo. **2**
Mi forprenos ĉion de sur la tero, diras la Eternulo. **3**
Mi forprenos la homojn kaj la brutojn, Mi forprenos la
birdojn de la ĉielo kaj la fiŝojn de la maro, la delogilojn
kune kun la malpiuloj; Mi ekstermos la homojn de sur
la tero, diras la Eternulo. **4** Mi etendos Mian manon
sur Judujon kaj sur ĉiujn loĝantojn de Jerusalem;
Mi ekstermos de ĉi tiu loko la restaĵon de Baal, la
nomon de la idolpastroj kaj ankaŭ de la pastroj; **5**
tiujn, kiuj sur la tegmentoj adorkliniĝas antaŭ la
armeo de la ĉielo, kaj tiujn, kiuj, adorkliniĝante, ĵuras
per la Eternulo kaj ĵuras ankaŭ per Malkam; **6** kaj
tiujn, kiuj defalis de la Eternulo, kiuj ne serĉis la
Eternulon kaj ne turnis sin al Li. **7** Silentu antaŭ la
Sinjoro, la Eternulo, ĉar proksima estas la tago de
la Eternulo; ĉar la Eternulo pretigis buĉoferon kaj
destinis la invitotojn. **8** En la tago de la buĉofero de
la Eternulo Mi punos la altrangulojn kaj la reĝidojn,
kaj ĉiujn, kiuj vestas sin per vestoj de aligentuloj; **9**
Mi punos en tiu tago ĉiujn, kiuj transsaltas la sojlon
kaj plenigas la domon de sia sinjoro per perforteco
kaj trompoj. **10** En tiu tago, diras la Eternulo, estos
laŭta kriado ĉe la Pordego de Fiŝoj, ĝemegado ĉe la
dua kvartalo de la urbo, kaj granda plorkriado sur la
montetoj. **11** Ĝemegu, loĝantoj de la malalta parto de
la urbo; ĉar malaperos la tuta popolo de la butikistoj,
kaj ekstermitaj estos ĉiuj ŝarĝitaj per arĝento. **12** En
tiu tempo Mi traesploros Jerusalemon kun lumiloj, kaj
Mi punos tiujn, kiuj ripozas sur sia feĉo, kaj diras en
sia koro: La Eternulo ne faras bonon, nek malbonon.
**13** Ilia havaĵo fariĝos rabaĵo, kaj iliaj domoj fariĝos
ruinoj; ili konstruos domojn, sed ne loĝos en ili, ili
plantos vinberĝardenojn, sed ne trinkos ilian vinon.
**14** Proksima estas la granda tago de la Eternulo, ĝi
estas proksima kaj venos tre baldaŭ; oni aŭdas jam
la tagon de la Eternulo; maldolĉe tiam plorkrios eĉ
kuraĝulo. **15** Tago de kolero estos tiu tago, tago de
malĝojo kaj de angoro, tago de teruro kaj de dezertigo,
tago de mallumo kaj de senlumeco, tago de nuboj
kaj de nebulego, **16** tago de korno kaj de trumpetado
kontraŭ la fortikigitaj urboj kaj kontraŭ la altaj turoj.
**17** Mi premos la homojn, kaj ili irados kiel blinduloj
pro tio, ke ili pekis antaŭ la Eternulo; ilia sango estos
disŝprucigita kiel polvo, kaj ilia karno kiel sterko. **18**
Nek ilia arĝento nek ilia oro povos ilin savi en la tago
de la kolero de la Eternulo, sed per la fajro de Lia
indigno estos forbruligita la tuta lando; ĉar rapidan
ekstermon Li faros al ĉiuj loĝantoj de la lando.

**2** Kolektiĝu kaj konsciiĝu, ho nacio ne aminda, **2**
antaŭ ol eliris la dekreto (la tago forflugas kiel
grenventumaĵo), antaŭ ol trafis vin la flama kolero de
la Eternulo, antaŭ ol venis por vi la tago de indigno
de la Eternulo. **3** Serĉu la Eternulon, ĉiuj humiluloj
sur la tero, kiuj plenumas Liajn leĝojn; serĉu veron,
serĉu humilecon, por ke vi povu esti kaŝitaj en la tago
de kolero de la Eternulo. **4** Ĉar Gaza estos forlasita,
Aŝkelon estos dezertigita, Aŝdod estos elpelita meze
de la tago, kaj Ekron estos elradikigita. **5** Ve al tiuj,
kiuj loĝas en la distrikto de la maro, al la nacio de
Keretidoj! la vorto de la Eternulo estas kontraŭ vi,
ho Kanaan, lando Filiŝta: Mi vin pereigos tiel, ke
restos neniu loĝanto. **6** La apudmara regiono estos
nur loko por loĝejoj de paŝtistoj kaj por ŝafejoj. **7**
Kaj la regiono fariĝos apartenaĵo de la restaĵo de la
domo de Jehuda; tie ili paŝtos, en la domoj de Aŝkelon
ili ripozos vespere, post kiam la Eternulo, ilia Dio,
rememoros ilin kaj revenigos ilin el la kaptiteco. **8**
Mi aŭdis la insultadon de Moab kaj la malhonoradon
de la Amonidoj, kiel ili insultadis Mian popolon
kaj fanfaronadis ĉe ĝiaj limoj. **9** Tial, kiel Mi vivas,
diras la Eternulo Cebaot, Dio de Izrael, Moab fariĝos
kiel Sodom, kaj la Amonidoj kiel Gomora, urtikejo,
salfosejo, dezerto por ĉiam; la restaĵo de Mia popolo
prenos ilin kiel kaptaĵon, kaj la restintoj el Mia popolo
heredos ilin. **10** Tio fariĝos al ili pro ilia malhumileco,
pro tio, ke ili insultadis la popolon de la Eternulo
Cebaot kaj tenis sin alte antaŭ ĝi. **11** La Eternulo
estos terura por ili; ĉar Li ekstermos ĉiujn diojn de la
tero; kaj antaŭ Li adorkliniĝos, ĉiu sur sia loko, ĉiuj
insuloj de la nacioj. **12** Ankaŭ vi, ho Etiopoj, estos
mortigitaj de Mia glavo. **13** Li etendos Sian manon
norden kaj pereigos Asirion, kaj faros Nineven ruinoj,
senakva loko, kiel dezerto. **14** Kaj ripozados en ĝi
amasoj da ĉiuspecaj bestoj; eĉ pelikanoj kaj botaŭroj
noktos en ĝiaj kapiteloj, kaj ilia voĉo estos aŭdata tra
la fenestroj; la sojloj estos ruinigitaj, ĉar la cedraj
tabuloj estos forŝiritaj. **15** Tia estos la gaja urbo, kiu
estis ekster danĝero, kaj kiu parolis en sia koro: Mi
estas sola, kaj ne ekzistas alia krom mi. Kiel ĝi estas

ruinigita, fariĝis ripozejo por bestoj! Ĉiu preteriranto
fajfos pri ĝi kaj svingos la manon.

3 Ve al la abomeninda kaj malpurigita urbo-
premanto! 2 Ĝi ne aŭskultas voĉon, ne akceptas
admonon; la Eternulon ĝi ne fidas, al sia Dio ĝi
sin ne turnas. 3 Ĝiaj eminentuloj meze de ĝi estas
kiel blekegantaj leonoj; ĝiaj juĝistoj estas kiel lupoj
vespere; ili nenion restigas ĝis mateno. 4 Ĝiaj profetoj
estas facilanimaj kaj perfidaj; ĝiaj pastroj malsanktigas
la sanktejon, kripligas la instruon. 5 La Eternulo estas
justulo meze de ĝi, Li ne faras maljustaĵon; ĉiumatene
Li montras Siajn leĝojn, ne ĉesas; sed la malpiulo
ne konas honton. 6 Mi ekstermis naciojn; ruinigitaj
estas iliaj turoj; Mi dezertigis iliajn stratojn tiel, ke
neniu trairas ilin; iliaj urboj estas ruinigitaj tiel, ke
tie troviĝas jam neniu homo, neniu loĝanto. 7 Mi
diris al ĝi: Timu Min, akceptu admonon! Kaj ne estus
ekstermita ĝia loĝejo, kiom ajn Mi punus ĝin; sed ili
rapidis malbonigi ĉiujn siajn agojn. 8 Tial atendu Min,
diras la Eternulo, ĝis Mi Miatempe leviĝos; ĉar Mi
decidis kolekti la naciojn, kunvenigi la regnojn, por
elverŝi sur ilin Mian koleron, la tutan flamon de Mia
indigno; ĉar de la fajro de Mia severeco forbrulos la
tuta tero. 9 Tiam Mi redonos al la popoloj lingvon
puran, por ke ĉiuj vokadu la nomon de la Eternulo
kaj servadu al Li unuanime. 10 El trans la riveroj de
Etiopujo Miaj adorantoj, Mia disĵetita popolo, alportos
al Mi donacojn. 11 En tiu tempo vi ne plu hontos
pri ĉiuj viaj agoj, per kiuj vi krimis kontraŭ Mi; ĉar
tiam Mi forigos el inter vi viajn fierajn fanfaronulojn,
kaj vi ne plu tenos vin malhumile sur Mia sankta
monto. 12 Mi restigos en via mezo popolon humilan
kaj malriĉan, kaj ili fidados la nomon de la Eternulo. 13
La restintoj el Izrael ne faros maljustaĵon, ne parolos
mensogon, kaj en ilia buŝo ne troviĝos lango trompa,
sed ili paŝtiĝados kaj ripozados, kaj neniu ilin timigos.
14 Ĝojkriu, ho filino de Cion; triumfu, ho Izrael; ĝoju
kaj estu gaja el la tuta koro, ho filino de Jerusalem.
15 La Eternulo forigis la verdikton pri vi, forpelis
vian malamikon; la Reĝo de Izrael, la Eternulo, estas
meze de vi, kaj vi ne plu vidos malfeliĉon. 16 En tiu
tempo oni diros al Jerusalem: Ne timu! kaj al Cion:
Viaj manoj ne senfortiĝu. 17 La Eternulo, via Dio,
estas meze de vi, forta Savanto; Li ĝojos pri vi gaje, Li
pardonos al vi pro Sia amo, Li ĝoje triumfos pri vi.
18 La sentaŭgulojn el via mezo Mi forprenos, por ke
vi ne plu havu malhonoron pro ili. 19 Jen Mi faros
finon en tiu tempo al ĉiuj viaj premantoj, Mi helpos la
lamulojn, Mi kolektos la dispelitojn, kaj Mi faros ilin
gloraj kaj honorataj en ĉiuj landoj, kie oni malestimis
ilin. 20 En tiu tempo Mi venigos vin, kaj en tiu tempo
Mi kolektos vin; ĉar Mi faros vin gloraj kaj honorataj
inter ĉiuj popoloj de la lando, kiam Mi revenigos viajn
kaptitojn antaŭ viaj okuloj, diras la Eternulo.

# Ĥagaj

1 En la dua jaro de la reĝo Dario, en la sesa monato,
en la unua tago de la monato, aperis vorto de la
Eternulo per la profeto Ĥagaj al Zerubabel, filo de
Ŝealtiel, regionestro de Judujo, kaj al la ĉefpastro
Josuo, filo de Jehocadak, dirante: 2 Tiele diras la
Eternulo Cebaot: Tiu popolo diras, ke ankoraŭ ne
venis la tempo, por konstrui la domon de la Eternulo.
3 Sed aperis vorto de la Eternulo per la profeto Ĥagaj,
dirante: 4 Ĉu por vi mem estas nun la ĝusta tempo,
por sidi en viaj tabulitaj domoj, dum tiu domo estas
ruinoj? 5 Nun tiele diras la Eternulo Cebaot: Pripensu
bone vian staton: 6 vi semas multe, sed enportas
malmulte; vi manĝas, sed ne ĝissate; vi trinkas, sed ne
ĝisebrie; vi vestas vin, sed ne estas al vi varme; kiu
laborenspezas monon, tiu laborenspezas por truhava
saketo. 7 Tiele diras la Eternulo Cebaot: Pripensu
bone vian staton. 8 Iru sur la monton, prenu lignon,
kaj konstruu la domon; Mi akceptos ĝin favore, kaj
Mi montros Mian gloron, diras la Eternulo. 9 Vi
atendis multon, sed montriĝis, ke estas malmulte;
kaj kion vi alportis hejmen, tion Mi disblovis. Pro kio
tiel estas? diras la Eternulo Cebaot; pro tio, ke Mia
domo estas dezerta, dum vi kuras ĉiu al sia domo.
10 Pro tio la ĉielo ne donas al vi roson kaj la tero ne
donas siajn produktaĵojn. 11 Kaj Mi alvokis sekecon
sur la teron, sur la montojn, sur la grenon, sur la
moston, sur la oleon, kaj sur ĉion, kion produktas la
tero, ankaŭ sur la homon, sur la bruton, kaj sur ĉiun
laboron de la manoj. 12 Zerubabel, file de Ŝealtiel,
kaj la ĉefpastro Josuo, filo de Jehocadak, kaj la tuta
cetera popolo aŭskultis la voĉon de la Eternulo, ilia
Dio, kaj la vortojn de la profeto Ĥagaj, kun kiuj lin
sendis la Eternulo, ilia Dio; kaj la popolo ektimis la
Eternulon. 13 Kaj Ĥagaj, la sendito de la Eternulo, diris
al la popolo en la nomo de la Eternulo jene: Mi estas
kun vi, diras la Eternulo. 14 Kaj la Eternulo vigligis la
spiriton de Zerubabel, filo de Ŝealtiel, regionestro de
Judujo, kaj la spiriton de la ĉefpastro Josuo, filo de
Jehocadak, kaj la spiriton de la tuta cetera popolo; kaj
ili venis kaj komencis labori en la domo de la Eternulo
Cebaot, ilia Dio, 15 en la dudek-kvara tago de la sesa
monato, en la dua jaro de la reĝo Dario.

2 En la sepa monato, en la dudek-unua tago de la
monato, aperis vorto de la Eternulo per la profeto
Ĥagaj, dirante: 2 Diru al Zerubabel, filo de Ŝealtiel,
regionestro de Judujo, kaj al la ĉefpastro Josuo, filo
de Jehocadak, kaj al la cetera popolo jene: 3 Kiu
restis inter vi, kiu vidis ĉi tiun domon en ĝia antaŭa
belegeco? kaj kion vi vidas en ĝi nun? ĉu ĝi ne aperas
antaŭ viaj okuloj kiel nenio? 4 Sed estu kuraĝa, ho
Zerubabel, diras la Eternulo; estu kuraĝa, ho ĉefpastro
Josuo, filo de Jehocadak; estu kuraĝa, ho tuta popolo
de la lando, diras la Eternulo; kaj laboru, ĉar Mi
estas kun vi, diras la Eternulo Cebaot. 5 Konforme
al la interligo, kiun Mi faris kun vi, kiam vi eliris
el Egiptujo, Mia spirito estas inter vi; ne timu. 6
Ĉar tiele diras la Eternulo Cebaot: Pasos malmulte
da temo, kaj Mi ekmovos la ĉielon kaj la teron, la
maron kaj la sekteron; 7 Mi skuos ĉiujn popolojn; kaj
venos io ĉarma por ĉiuj nacioj, kaj Mi plenigos ĉi tiun
domon per gloro, diras la Eternulo Cebaot. 8 Al Mi
apartenas la arĝento kaj al Mi apartenas la oro, diras
la Eternulo Cebaot. 9 La gloro de ĉi tiu lasta domo
estos pli granda, ol de la antaŭa, diras la Eternulo
Cebaot; kaj sur ĉi tiu loko Mi donos pacon, diras la
Eternulo Cebaot. 10 En la dudek-kvara tago de la naŭa
monato, en la dua jaro de Dario, aperis vorto de la
Eternulo per la profeto Ĥagaj, dirante: 11 Tiele diras la
Eternulo Cebaot: Petu de la pastroj instruon, kaj diru:
12 Jen homo portis sanktigitan viandon en la basko de
sia vesto, kaj per sia basko li ektuŝis panon aŭ ion
kuiritan aŭ vinon aŭ oleon aŭ ian manĝaĵon — ĉu ĝi
tiam fariĝos sankta? La pastroj respondis kaj diris: Ne.
13 Ĥagaj plue diris: Kaj se ĉion ĉi tion ektuŝos iu, kiu
malpuriĝis per mortinto — ĉu ĝi tiam malpuriĝos? La
pastroj respondis kaj diris: Ĝi malpuriĝos. 14 Tiam
Ĥagaj diris: Tia estas ĉi tiu popolo, kaj tia estas ĉi
tiu gento antaŭ Mi, diras la Eternulo, kaj tiaj estas
ĉiuj faroj de iliaj manoj; kaj ĉio, kion ili tie alportas,
estas malpura. 15 Nun pripensu bone la tempon de
ĉi tiu tago malantaŭen, antaŭ ol estis metita ŝtono
sur ŝtonon en la templo de la Eternulo: 16 kiam iu
venis al garbaro, kiu devis havi dudek mezurojn, ĝi
havis nur dek; kiam iu venis al la vinpremejo, por
ĉerpi kvindek mezurojn, troviĝis nur dudek; 17 Mi
frapis vin per sekiga vento, per forvelkado kaj per
hajlo ĉiujn laborojn de viaj manoj, sed vi tamen ne
turnis vin al Mi, diras la Eternulo. 18 Pripensu bone
la tempon de ĉi tiu tago malantaŭen, de la dudek-
kvara tago de la naŭa monato, de la tago, en kiu estas
fondita la templo de la Eternulo; pripensu bone: 19 Ĉu

troviĝas semoj en la grenejo? ĝis nun la vinberbranĉo,
la figarbo, la granatarbo, kaj la olivarbo ne donis
fruktojn; sed de post ĉi tiu tago Mi vin benos. **20** Kaj
duafoje aperis vorto de la Eternulo al Ĥagaj en la
dudek-kvara tago de la monato, dirante: **21** Diru al
Zerubabel, regionestro de Judujo, jene: Mi ekmovos la
ĉielon kaj la teron; **22** Mi renversos tronojn de regnoj,
Mi ekstermos la forton de regnoj de la nacioj, Mi
renversos ĉarojn kun iliaj veturantoj; falos la ĉevaloj,
kaj iliaj rajdantoj falos unu de glavo de alia. **23** En
tiu tempo, diras la Eternulo Cebaot, Mi prenos vin,
ho Zerubabel, Mia servanto, filo de Ŝealtiel, diras la
Eternulo, kaj Mi konservos vin kiel sigelringon; ĉar
vin Mi elektis, diras la Eternulo Cebaot.

# Zeĥarja

**1** En la oka monato, en la dua jaro de Dario, aperis
vorto de la Eternulo al la profeto Zeĥarja, filo de
Bereĥja, filo de Ido, dirante: 2 Forte koleris la Eternulo
kontraŭ viaj patroj. 3 Diru do al ili: Tiele diras la
Eternulo Cebaot: Revenu al Mi, diras la Eternulo
Cebaot, kaj tiam Mi returnos Min al vi, diras la
Eternulo Cebaot. 4 Ne estu kiel viaj patroj, al kiuj
vokadis la antaŭaj profetoj, dirante: Tiele diras la
Eternulo Cebaot: Deturnu vin de viaj malbonaj vojoj
kaj de viaj malbonaj agoj — sed ili ne aŭskultis kaj ne
atentis Min, diras la Eternulo. 5 Kie estas viaj patroj?
kaj eĉ la profetoj, ĉu ili povas vivi eterne? 6 Sed Miaj
vortoj kaj decidoj, pri kiuj Mi diris al Miaj servantoj,
la profetoj, ĉu ili ne trafis viajn patrojn? Kaj ili pentis,
kaj diris: Kiel la Eternulo Cebaot decidis agi kun ni
pro niaj vojoj kaj pro niaj agoj, tiel Li agis kun ni. 7
En la dudek-kvara tago de la dek-unua monato, tio
estas de la monato Ŝebat, en la dua jaro de Dario,
aperis vorto de la Eternulo al la profeto Zeĥarja, filo
de Bereĥja, filo de Ido, dirante: 8 Mi vidis en la nokto:
jen viro sidas sur ruĝa ĉevalo, kaj li troviĝas inter
mirtoj en ombrita loko, kaj post li troviĝas ĉevaloj
ruĝaj, brunaj, kaj blankaj. 9 Mi demandis: Kiuj ili
estas, mia sinjoro? Kaj la anĝelo, kiu parolis kun mi,
diris al mi: Mi montros al vi, kiuj ili estas. 10 Kaj la
viro, kiu troviĝis inter la mirtoj, ekparolis kaj diris:
Ili estas tiuj, kiujn la Eternulo sendis, por trairi la
teron. 11 Kaj ili mem ekparolis al la anĝelo de la
Eternulo, kiu troviĝis inter la mirtoj, kaj diris: Ni
trairis la teron, kaj ni trovis, ke la tuta tero estas
trankvila kaj paca. 12 Tiam ekparolis la anĝelo de la
Eternulo kaj diris: Ho Eternulo Cebaot, kiel longe Vi
ne kompatos Jerusalemon kaj la urbojn de Judujo,
kiujn Vi koleras jam dum sepdek jaroj? 13 Kaj la
Eternulo respondis al la anĝelo, kiu parolis kun mi,
vortojn bonajn, vortojn konsolajn. 14 Tiam diris al mi
la anĝelo, kiu parolis kun mi: Proklamu kaj diru: Tiele
diras la Eternulo Cebaot: Mi ekfervoris pri Jerusalem
kaj pri Cion per granda fervoro; 15 kaj per granda
indigno Mi indignas kontraŭ la nacioj memfidaj; ĉar
kiam Mi koleris malmulte, ili akcelis la malfeliĉon.
16 Tial tiele diras la Eternulo: Mi returnas Min al
Jerusalem kun kompato; Mia domo estos konstruita en
ĝi, diras la Eternulo Cebaot, kaj ŝnuro de ĉarpentistoj
estos tirata en Jerusalem. 17 Ankoraŭ proklamu jenon:
Tiele diras la Eternulo Cebaot: Denove pleniĝos Miaj
urboj per bonaĵo, denove la Eternulo konsolos Cionon,
kaj denove Li elektos Jerusalemon. 18 Mi levis miajn
okulojn kaj ekvidis: jen estas kvar kornoj. 19 Kaj mi
diris al la anĝelo, kiu parolis kun mi: Kion tio signifas?
Kaj li respondis al mi: Tio estas la kornoj, kiuj disĵetis
Jehudan, Izraelon, kaj Jerusalemon. 20 Kaj la Eternulo
montris al mi kvar majstrojn. 21 Mi diris: Kion ili
intencas fari? Li respondis jene: Tiuj kornoj disĵetis
Jehudan tiel, ke neniu povis levi sian kapon; tial
nun venas ĉi tiuj, por fortimigi tiujn, por dehaki la
kornojn de la nacioj, kiuj levis sian kornon kontraŭ la
loĝantojn de Judujo, por disĵeti ilin.

**2** Mi denove levis miajn okulojn, kaj mi ekvidis: jen
staras viro, kiu tenas en sia mano mezurŝnuron.
2 Mi demandis: Kien vi iras? Kaj li respondis al mi:
Mezuri Jerusalemon, por vidi, kiel larĝa kaj kiel longa
ĝi estas. 3 Kaj jen la anĝelo, kiu parolis kun mi, eliris,
kaj alia anĝelo iris renkonte al li, 4 kaj diris al li: Kuru,
kaj diru al ĉi tiu junulo: Sen murego estos Jerusalem,
pro la multeco de la homoj kaj brutoj en ĝi. 5 Sed Mi
estos por ĝi fajra murego ĉirkaŭe, diras la Eternulo,
kaj Mi estos glora meze de ĝi. 6 He, he! kuru el la
lando norda, diras la Eternulo; ĉar kiel la kvar ventojn
de la ĉielo Mi dispelis vin, diras la Eternulo. 7 He,
Cion, kiu loĝas ĉe la filino de Babel, saviĝu! 8 Ĉar tiele
diras la Eternulo Cebaot: Post la gloriĝo Li sendos
min al la nacioj, kiuj prirabis vin; ĉar kiu tuŝas vin,
tiu tuŝas la pupilon de Lia okulo. 9 Kaj jen mi levos
mian manon sur ilin, kaj ili fariĝos rabaĵo por tiuj,
kiujn ili sklavigis; kaj tiam vi ekscios, ke la Eternulo
Cebaot min sendis. 10 Ĝoju kaj estu gaja, ho filino de
Cion; ĉar jen Mi iras, por ekloĝi meze de vi, diras la
Eternulo. 11 Kaj multaj popoloj aliĝos al la Eternulo
en tiu tempo, kaj fariĝos Mia popolo, kaj Mi ekloĝos
meze de vi; kaj vi ekscios, ke la Eternulo Cebaot sendis
min al vi. 12 Kaj la Eternulo posedos Judujon kiel
Sian heredan parton sur la sankta tero, kaj Li denove
favoros Jerusalemon. 13 Ĉiu karno silentu antaŭ la
Eternulo, ĉar Li leviĝis el Sia sankta loĝejo.

**3** Li montris al mi la ĉefpastron Josuo, kiu staris
antaŭ la anĝelo de la Eternulo, kaj Satanon, kiu
staris dekstre de li, por kontraŭagi al li. 2 Kaj la
Eternulo diris al Satano: La Eternulo faras al vi severan
riproĉon, ho Satano, severe riproĉas vin la Eternulo,
kiu favoras Jerusalemon; ĝi estas ja brulŝtipo, savita el

la fajro. 3 Josuo estis vestita per malpuraj vestoj, kaj
staris antaŭ la anĝelo. 4 Ĉi tiu ekparolis kaj diris al tiuj,
kiuj staris antaŭ li: Deprenu de li la malpurajn vestojn.
Kaj al li mem li diris: Vidu, mi deprenis de vi vian
pekon, kaj mi metos sur vin festajn vestojn. 5 Kaj li
diris, ke oni metu puran kapornamon sur lian kapon;
kaj oni metis la puran kapornamon sur lian kapon kaj
vestis lin per novaj vestoj, en la ĉeesto de la anĝelo de
la Eternulo. 6 Kaj la anĝelo de la Eternulo atestis al
Josuo, dirante: 7 Tiele diras la Eternulo Cebaot: Se vi
irados laŭ Miaj vojoj kaj plenumados la servadon al
Mi, tiam vi regados en Mia domo kaj administrados
en Miaj kortoj, kaj Mi donos al vi akompanantojn el
tiuj, kiuj staras ĉi tie. 8 Aŭskultu, ho ĉefpastro Josuo,
vi kaj viaj amikoj, kiuj sidas apud vi, ĉar ili komprenas
misterajn signojn: jen Mi venigos Mian servanton-
markoton. 9 Ĉar vidu la ŝtonon, kiun Mi metis antaŭ
Josuon: sur ĉi tiu sola ŝtono estas sep okuloj; jen Mi
gravuros sur ĝi signojn, diras la Eternulo Cebaot, kaj
Mi forigos la pekon de ĉi tiu lando en unu tago. 10
En tiu tempo, diras la Eternulo Cebaot, vi vokos unu
alian sub vinberbranĉon kaj sub figarbon.

**4** Kaj revenis la anĝelo, kiu antaŭe parolis kun mi;
kaj li vekis min, kiel oni vekas iun el lia dormo. 2
Kaj li diris al mi: Kion vi vidas? Mi respondis: Mi vidas
kandelabron tute el oro, kaj kaliketon ĝi havas sur sia
supro, kaj sep lucernoj estas sur ĝi, kaj po sep tubetoj
troviĝas sur la lucernoj supre de ĝi. 3 Kaj du olivarboj
troviĝas super ĝi: unu dekstre de la kaliketo kaj la
dua maldekstre de ĝi. 4 Kaj mi ekparolis kaj diris al
la anĝelo, kiu parolis kun mi: Kio tio estas, ho mia
sinjoro? 5 La anĝelo, kiu parolis kun mi, respondis kaj
diris: Ĉu vi ne scias, kio tio estas? Mi diris: Ne, mia
sinjoro. 6 Tiam li responde diris al mi jene: Tio estas la
vorto de la Eternulo al Zerubabel, kaj signifas: Ne per
militistaro kaj ne per forto, sed nur per Mia spirito,
diras la Eternulo Cebaot. 7 Kiu vi estas, ho granda
monto? antaŭ Zerubabel vi fariĝos ebenaĵo; kaj li
metos la unuan ŝtonon sub komuna vokado: Feliĉo,
feliĉo al ĝi! 8 Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo,
dirante: 9 La manoj de Zerubabel fondis ĉi tiun domon,
kaj liaj manoj ankaŭ finos ĝin; kaj vi ekscios, ke la
Eternulo Cebaot sendis min al vi. 10 Ĉar kiu povas
malŝati ĉi tiun tagon kiel malgrandan, kiam ĝoje
rigardas la vertikalŝnuron en la mano de Zerubabel
tiuj sep okuloj de la Eternulo, kiuj trapenetras per sia
rigardo la tutan teron? 11 Tiam mi denove parolis
kaj diris al li: Kion signifas tiuj du olivarboj dekstre
kaj maldekstre de la kandelabro? 12 Kaj mi parolis
ankoraŭ kaj diris al li: Kion signifas la du branĉoj de
olivarboj, kiuj troviĝas apud la du oraj tubetoj, tra
kiuj fluas oro? 13 Li respondis al mi kaj diris: Ĉu vi
ne scias, kio tio estas? Mi diris: Ne, mia sinjoro. 14
Tiam li diris: Tio estas du oleitoj, kiuj staras apud la
Reganto de la tuta tero.

**5** Mi levis denove miajn okulojn, kaj mi ekvidis
disvolvitan skribrulaĵon. 2 Kaj li diris al mi: Kion vi
vidas? Mi respondis: Mi vidas disvolvitan skribrulaĵon,
kiu havas la longon de dudek ulnoj kaj la larĝon de
dek ulnoj. 3 Tiam li diris al mi: Tio estas la malbeno,
kiu eliras sur la supraĵon de la tuta lando; ĉar ĉiu, kiu
ŝtelas, estos ekstermita, kiel estas dirite en ĝi, kaj ĉiu,
kiu ĵuras mensoge, estos ekstermita, kiel estas dirite
en ĝi. 4 Mi elirigas ĝin, diras la Eternulo Cebaot, kaj ĝi
eniros en la domon de ŝtelisto, kaj en la domon de
tiu, kiu malvere ĵuras per Mia nomo; kaj ĝi restos en
lia domo kaj ekstermos ĝin kune kun ĝia ligno kaj kun
ĝiaj ŝtonoj. 5 La anĝelo, kiu parolis kun mi, elpaŝis, kaj
diris al mi: Levu nun viajn okulojn, kaj rigardu, kio
aperas. 6 Mi diris: Kio tio estas? Kaj li respondis: Eliras
mezurvazo; kaj li diris plue: Tio estas ilia aspekto
en la tuta lando. 7 Kaj jen leviĝis kikaro da plumbo,
kaj jen ia virino sidas interne de la mezurvazo. 8
Li diris: Tio estas la Malpieco; kaj li ĵetis ŝin sur la
fundon de la mezurvazo, kaj sur la aperturon li ĵetis
la plumban mason. 9 Mi levis miajn okulojn, kaj vidis,
ke aperas du virinoj, kaj vento estas en iliaj flugiloj,
kaj iliaj flugiloj estis kiel la flugiloj de cikonio; ili levis
la mezurvazon inter la teron kaj la ĉielon. 10 Mi diris
al la anĝelo, kiu parolis kun mi: Kien ili forportas tiun
mezurvazon? 11 Li respondis al mi: Por konstrui por
ĝi domon en la lando Ŝinar; kiam ĉio estos preta, oni
starigos ĝin tie sur ĝia bazo.

**6** Mi levis denove miajn okulojn, kaj mi ekvidis: jen
kvar ĉaroj eliras el inter du montoj; kaj la montoj
estas kupraj. 2 La unua ĉaro havis ĉevalojn ruĝajn, la
dua ĉaro havis ĉevalojn nigrajn, 3 la tria ĉaro havis
ĉevalojn blankajn, kaj la kvara ĉaro havis ĉevalojn
makulitajn kaj brunajn. 4 Mi ekparolis kaj diris al la
anĝelo, kiu parolis kun mi: Kio tio estas, mia sinjoro?
5 La anĝelo respondis kaj diris al mi: Tio estas la kvar
spiritoj de la ĉielo, kiuj eliras post sia starado antaŭ la

Reganto de la tuta tero. 6 La ĉaro kun la nigraj ĉevaloj
iris al la lando norda, la blankaj iris post ili, kaj la
makulitaj iris al la lando suda. 7 La brunaj eliris, kaj
deziris trairi la teron; kaj li diris: Iru, trairu la teron;
kaj ili trairis la teron. 8 Kaj li kriis al mi, kaj diris
al mi jene: Vidu, tiuj, kiuj eliris al la lando norda,
kontentigis Mian spiriton en la lando norda. 9 Kaj
aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante: 10 Prenu de
la forkondukitoj, de Ĥeldaj, de Tobija, kaj de Jedaja,
kaj iru en la domon de Joŝija, filo de Cefanja, iru en la
sama tago, kiam ili venos el Babel; 11 prenu arĝenton
kaj oron, kaj faru kronojn kaj metu sur la kapon de la
ĉefpastro Josuo, filo de Jehocadak, 12 kaj diru al li
jene: Tiele diras la Eternulo Cebaot: Jen estas viro,
kies nomo estas Markoto; li kreskos el sia loko kaj
konstruos la templon de la Eternulo. 13 Li konstruos
la templon de la Eternulo, li ricevos gloron kaj sidos
kaj regos sur sia trono; li estos ankaŭ pastro sur sia
trono, kaj konsiliĝo paca estos inter ambaŭ. 14 Kaj tiuj
kronoj estos ĉe Ĥelem, Tobija, Jedaja, kaj Ĥen, filo de
Cefanja, kiel memoraĵo en la templo de la Eternulo. 15
Kaj malproksime loĝantoj venos kaj konstruos en la
templo de la Eternulo, kaj vi ekscios, ke la Eternulo
Cebaot sendis min al vi; kaj tio okazos, se vi obeados
la voĉon de la Eternulo, via Dio.

7 En la kvara jaro de la reĝo Dario aperis vorto
de la Eternulo al Zeĥarja, en la kvara tago de
la naŭa monato, tio estas de Kislev; 2 kiam Bet-
El sendis Ŝareceron kaj Regem-Meleĥon kun iliaj
akompanantoj, por preĝi antaŭ la Eternulo, 3 kaj
demandi la pastrojn, kiuj estis en la domo de la
Eternulo Cebaot, kaj la profetojn, jene: Ĉu ni devas
plori en la kvina monato, kaj fasti, kiel ni faradis jam
dum multe da jaroj? 4 Tiam aperis al mi vorto de la
Eternulo Cebaot, dirante: 5 Diru al la tuta popolo de la
lando kaj al la pastroj jene: Kiam vi fastis kaj funebris
en la kvina monato kaj en la sepa dum la sepdek jaroj
— ĉu por Mi vi fastis? ĉu por Mi? 6 Kaj kiam vi manĝas
kaj trinkas, ĉu ne por vi mem vi manĝas kaj trinkas?
7 Ĉu la esenco ne estas tiuj vortoj, kiujn la Eternulo
proklamis per la antaŭaj profetoj, kiam Jerusalem
estis priloĝata kaj bonstata, kaj la urboj ĉirkaŭ ĝi, la
suda regiono kaj la malaltaĵo, estis priloĝataj? 8 Kaj
aperis vorto de la Eternulo al Zeĥarja, dirante: 9 Tiele
diras la Eternulo Cebaot: Faru juĝon justan, ĉiu estu
bona kaj kompatema al sia frato; 10 vidvinon, orfon,
fremdulon, kaj malriĉulon ne premu, kaj ne portu en
via koro malbonajn intencojn kontraŭ via frato. 11
Sed ili ne volis atenti, ili deturnis de Mi sian flankon,
kaj siajn orelojn ili ŝtopis, por ne aŭdi. 12 Sian koron
ili faris kiel diamanta ŝtono, por ne obei la instruon,
kaj la vortojn, kiujn la Eternulo Cebaot sendis en Sia
spirito per la antaŭaj profetoj; pro tio aperis granda
kolero de la Eternulo Cebaot. 13 Kaj ĉar Li vokis, kaj
ili ne aŭskultis, tial ankaŭ Mi ne aŭskultis, kiam ili
vokis, diras la Eternulo Cebaot. 14 Kaj Mi disblovis
ilin inter ĉiujn naciojn, kiujn ili ne konis, kaj la lando
post ili dezertiĝis tiel, ke neniu en ĝi iris tien aŭ reen;
tiamaniere la ĉarman landon ili faris dezerto.

8 Kaj aperis vorto de la Eternulo, dirante: 2 Tiele
diras la Eternulo Cebaot: Mi ekfervoris pri Cion per
granda fervoro, kaj kun granda kolero Mi ekfervoris
pri ĝi. 3 Tiele diras la Eternulo: Mi revenos al Cion,
Mi ekloĝos meze de Jerusalem, kaj Jerusalem estos
nomata urbo de la vero, kaj la monto de la Eternulo
Cebaot, monto sankta. 4 Tiele diras la Eternulo
Cebaot: Denove sidos maljunuloj kaj maljunulinoj sur
la placoj de Jerusalem, ĉiu kun bastono en la mano,
pro profundeco de la aĝo. 5 Kaj la stratoj de la urbo
pleniĝos de infanoj kaj infaninoj, ludantaj sur ĝiaj
stratoj. 6 Tiele diras la Eternulo Cebaot: Se en la okuloj
de la restintoj de la popolo en ĉi tiu tempo tio ŝajnas
ne ebla, ĉu tio estas ne ebla ankaŭ en Miaj okuloj?
diras la Eternulo Cebaot. 7 Tiele diras la Eternulo
Cebaot: Jen Mi savos Mian popolon el la lando orienta
kaj el la lando okcidenta; 8 Mi venigos ilin, kaj ili
ekloĝos interne de Jerusalem; kaj ili estos Mia popolo,
kaj Mi estos ilia Dio, en vero kaj justo. 9 Tiele diras la
Eternulo Cebaot: Fortigu viajn manojn, vi, kiuj aŭdas
en ĉi tiuj tagoj ĉi tiujn vortojn el la buŝo de la profetoj,
en la tago, kiam estas farata fondo por la konstruado
de la domo de la Eternulo Cebaot, la templo. 10 Ĉar
antaŭ ĉi tiuj tagoj ne ekzistis rekompenco por la
laboro de homo, nek por la laboro de bruto; nek la
eliranto nek la eniranto povis esti trankvila antaŭ la
malamiko; kaj Mi permesis al ĉiuj homoj ataki unu
la alian. 11 Sed nun Mi estas por la restintoj de tiu
popolo ne tia, kia Mi estis antaŭe, diras la Eternulo
Cebaot; 12 ĉar estos semo de paco: la vinberbranĉo
donos siajn fruktojn, la tero donos siajn produktaĵojn,
la ĉielo donos sian roson, kaj ĉion ĉi tion Mi posedigos
al la restintoj de ĉi tiu popolo. 13 Kaj kiel vi, ho domo

de Jehuda kaj domo de Izrael, estis malbeno inter
la nacioj, tiel Mi savos vin, kaj vi fariĝos beno; ne
timu do, kaj viaj manoj fortiĝu. 14 Ĉar tiele diras la
Eternulo Cebaot: Tiel same, kiel Mi intencis plagi
vin, kiam viaj patroj Min kolerigis, diras la Eternulo
Cebaot, kaj Mi ne fordecidis tion, 15 tiel Mi returnis
Min kaj intencas nun fari bonon al Jerusalem kaj al la
domo de Jehuda: ne timu. 16 Jen estas la aferoj, kiujn
vi devas fari: parolu veron unu al la alia, veran kaj
pacan juĝon faru en viaj pordegoj; 17 ne intencu en
via koro malbonon unu kontraŭ la alia, kaj ne amu
mensogan ĵuron; ĉar ĉion ĉi tion Mi malamas, diras
la Eternulo. 18 Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo
Cebaot, dirante: 19 Tiele diras la Eternulo Cebaot: La
fastotago de la kvara monato kaj la fastotago de la
kvina kaj la fastotago de la sepa kaj la fastotago de
la deka estos por la domo de Jehuda ĝojo kaj gajeco
kaj agrablaj festoj; tial amu la veron kaj la pacon.
20 Tiele diras la Eternulo Cebaot: Venados ankoraŭ
popoloj kaj loĝantoj de multaj urboj; 21 kaj la loĝantoj
de unu urbo venos al la loĝantoj de alia urbo, kaj
diros: Ni iru rapide, por preĝi antaŭ la Eternulo kaj
por turni nin al la Eternulo Cebaot; mi ankaŭ iros. 22
Kaj venos multaj popoloj kaj potencaj nacioj, por serĉi
la Eternulon Cebaot en Jerusalem kaj por preĝi antaŭ
la Eternulo. 23 Tiele diras la Eternulo Cebaot: En tiu
tempo forte kaptos dek homoj el ĉialingvaj nacioj la
baskon de Judo, kaj diros: Ni iros kun vi, ĉar ni aŭdis,
ke Dio estas kun vi.

9 Profeta vorto de la Eternulo pri la lando Ĥadraĥ kaj
pri ĝia ripozejo Damasko (ĉar la Eternulo rigardas
ĉiujn homojn, kiel ĉiujn tribojn de Izrael), 2 kaj
pri Ĥamat, kiu havas sian limon apud ĝi, pri Tiro
kaj Cidon, kiuj pensas, ke ili estas tre saĝaj. 3 Tiro
konstruis al si fortikaĵon, kaj kolektis arĝenton kiel
polvon, kaj oron kiel stratan koton; 4 sed jen la Sinjoro
faros ĝin malriĉa kaj ĵetos en la maron ĝian remparon,
kaj ĝi mem estos ekstermita de fajro. 5 Aŝkelon tion
vidos kaj ektimos, Gaza forte ektremos, ankaŭ Ekron,
ĉar ĝia fido kovriĝos per honto; pereos la reĝo de
Gaza, kaj Aŝkelon ne plu estos loĝata. 6 En Aŝdod loĝos
fremduloj, kaj Mi ekstermos la fierecon de Filiŝtujo. 7
Mi forigos la sangon el ĝia buŝo kaj la abomenindan
manĝaĵon el ĝiaj dentoj, kaj ĝi mem fariĝos apartenaĵo
de nia Dio, kaj ĝi estos distrikto de Judujo, kaj Ekron
fariĝos kiel la Jebusidoj. 8 Mi gardos Mian domon
kontraŭ la militistoj, por ke neniu trairu tien kaj reen,
kaj ne plu venos al ĝi premanto; ĉar Mi rigardas ĝin
nun per Miaj okuloj. 9 Ĝoju forte, ho filino de Cion,
triumfu, ho filino de Jerusalem: jen via reĝo iras al vi;
justa kaj helpema li estas, humila kaj rajdanta sur
azeno, sur ido de azenino. 10 Ĉar Mi ekstermos ĉarojn
ĉe Efraim kaj ĉevalojn en Jerusalem, kaj ekstermita
estos milita pafarko; li proklamos pacon al la nacioj,
kaj lia regado estos de maro ĝis maro, de la Rivero ĝis
la finoj de la tero. 11 Kaj pro la sango de via interligo
Mi eligos viajn malliberulojn el la senakva kavo. 12
Reiru al la fortikaĵo, vi, ligitaj de espero! ĉar hodiaŭ
Mi sciigas, ke Mi redonos al vi duoble. 13 Mi streĉos
al Mi Judujon kiel pafarkon, Mi armos Efraimon, Mi
levos viajn filojn, ho Cion, kontraŭ viajn filojn, ho
Grekujo, kaj Mi faros vin kiel glavo de heroo. 14 La
Eternulo aperos super ili, Lia sago elflugos kiel fulmo,
la Sinjoro, la Eternulo, ekblovos per trumpeto kaj
paŝos en suda ventego. 15 La Eternulo Cebaot defendos
ilin, kaj ili ekstermos, kaj ili piedpremos la ŝtonojn de
la ŝtonĵetiloj; ili trinkos, kaj bruos kvazaŭ de vino;
ili pleniĝos kiel porofera kaliko, kiel la anguloj de la
altaro. 16 Kaj savos ilin la Eternulo, ilia Dio, en tiu
tempo, kiel la ŝafojn de Sia popolo; ĉar kiel ŝtonoj de
krono ili brilos sur Lia tero. 17 Ĉar kiel granda estas
Lia boneco, kaj kiel granda estas Lia beleco! Pano
vigligos la junulojn, kaj mosto la junulinojn.

10 Petu de la Eternulo pluvon printempan; la
Eternulo faros fulmojn, kaj donos abundan
pluvon por ĉiuj kreskaĵoj sur la kampo. 2 La domaj dioj
parolas sensencaĵon, la antaŭdiristoj havas malverajn
viziojn, rakontas mensogajn sonĝojn, kaj konsolas per
vantaĵo; tial ili diskuras kiel ŝafoj, suferas pro tio, ke ili
ne havas paŝtiston. 3 Kontraŭ la paŝtistoj ekflamis Mia
kolero, kaj la antaŭirantajn virkaprojn Mi punos; sed
la Eternulo Cebaot vizitos Sian ŝafaron, la domon de
Jehuda, kaj faros ĝin kiel ornamita ĉevalo en batalo. 4
El ĝi eliros la angula ŝtono, el ĝi la ĉefa stango, el ĝi la
batala pafarko, el ĝi eliros ĉiuj regantoj. 5 Ili estos kiel
forteguloj, kiuj piedpremas en batalo kvazaŭ koton
sur la strato; kaj ili batalos, ĉar la Eternulo estos kun
ili, kaj ili hontigos tiujn, kiuj sidas sur ĉevaloj. 6 Mi
fortigos la domon de Jehuda, Mi savos la domon de
Jozef, kaj Mi enloĝigos ilin, ĉar Mi kompatas ilin. Kaj ili
estos en tia stato, kvazaŭ Mi neniam ilin forlasis; ĉar
Mi, la Eternulo, estas ilia Dio, kaj Mi aŭskultos ilin. 7

Efraim estos kiel fortegulo; kaj ilia koro estos gaja, kiel
de vino; iliaj filoj vidos kaj ĝojos; ilia koro triumfos per
la Eternulo. 8 Mi fajfos al ili kaj kunvenigos ilin, ĉar Mi
elaĉetis ilin; kaj ili multiĝos, kiel ili multiĝis antaŭe. 9
Mi semos ilin inter la popoloj, kaj en malproksimaj
landoj ili memoros Min, kaj ili vivos kun siaj infanoj
kaj revenos. 10 Mi revenigos ilin el la lando Egipta, Mi
kolektos ilin el Asirio, Mi revenigos ilin en la landon
Gileadan kaj sur Lebanonon, kaj ne troviĝos sufiĉe da
loko por ili. 11 Malfeliĉo trairos la maron, batos la
ondojn de la maro, kaj sekiĝos ĉiuj profundaj lokoj de
Nilo; malaltiĝos la fiereco de Asirio, kaj malaperos la
sceptro de Egiptujo. 12 Mi faros ilin forteguloj per la
Eternulo, kaj en Lia nomo ili irados, diras la Eternulo.

**11** Malfermu, ho Lebanon, viajn pordojn, ke la fajro
ekstermu viajn cedrojn. 2 Ĝemegu, ho cipreso,
ĉar falis la cedro kaj la potenculoj estas ruinigitaj.
Ĝemegu, ho kverkoj de Baŝan, ĉar falis la fortika
arbaro. 3 Oni aŭdas ploradon de paŝtistoj, ĉar ilia
belegaĵo estas ruinigita; oni aŭdas kriadon de junaj
leonoj, ĉar forigita estas la beleco de Jordan. 4 Tiele
diras la Eternulo, mia Dio: Paŝtu la buĉotajn ŝafojn, 5
kiujn iliaj aĉetintoj mortigas, ne farante pekon, kaj
iliaj vendintoj diras: Dank' al la Eternulo, mi riĉiĝis;
kaj iliaj paŝtistoj ne bedaŭras ilin. 6 Pro tio Mi ne plu
indulgos la loĝantojn de la tero, diras la Eternulo;
jen Mi transdonos la homojn ĉiun en la manon de
lia proksimulo kaj en la manon de lia reĝo, kaj ili
frapados la teron, kaj Mi ne savos el ilia mano. 7 Kaj
mi paŝtis la ŝafojn buĉotajn, la plej malfeliĉajn el la
ŝafoj. Kaj mi prenis al mi du bastonojn, la unu mi
nomis Afableco kaj la duan Ligilo; kaj mi paŝtis la
ŝafojn. 8 Kaj mi forigis tri paŝtistojn en unu monato;
kaj deturnis sin de ili mia animo, kiel ankaŭ ilia animo
deturnis sin de mi. 9 Kaj mi diris: Mi vin ne paŝtos:
la mortonta mortu, la pereonta pereu, kaj la ceteraj
manĝu unu la karnon de la alia. 10 Kaj mi prenis
mian bastonon Afableco kaj rompis ĝin, por detrui la
interligon, kiun mi faris kun ĉiuj popoloj; 11 kaj ĝi
estis detruita en tiu tago. Kaj tiam la malfeliĉaj ŝafoj,
kiuj atentadis min, eksciis, ke tio estas vorto de la
Eternulo. 12 Kaj mi diris al ili: Se plaĉas al vi, donu
al mi mian laborpagon; se ne, tiam ne faru tion. Kaj
ili pesis al mi kiel mian laborpagon tridek arĝentajn
monerojn. 13 Kaj la Eternulo diris al mi: Ĵetu tion en
la trezorejon; bela prezo, per kiu ili taksis Min! Kaj
mi prenis la tridek arĝentajn monerojn kaj ĵetis ilin
en la trezorejon de la domo de la Eternulo. 14 Kaj
mi rompis mian duan bastonon Ligilo, por detrui la
fratecon inter Jehuda kaj Izrael. 15 Kaj la Eternulo
diris al mi: Prenu al vi ankoraŭ la ilaron de paŝtisto
malsaĝa; 16 ĉar jen Mi starigos sur la tero paŝtiston,
kiu ne serĉos la ŝafojn perdiĝintajn, ne zorgos pri la
junaj, ne kuracos la malsanajn, ne nutros la sanajn,
sed manĝos la viandon de la grasaj kaj disbatos iliajn
hufojn. 17 Ve al la malsaĝa paŝtisto, kiu forlasas la
ŝafojn! la glavo trafos lian brakon kaj lian dekstran
okulon; lia brako velksekiĝos, kaj lia dekstra okulo
tute perdos sian vidadon.

**12** Profeta vorto de la Eternulo pri Izrael. Diro
de la Eternulo, kiu etendis la ĉielon, fondis la
teron, kaj kreis la spiriton de la homo interne de li: 2
Jen Mi faros Jerusalemon freneziga kaliko por ĉiuj
popoloj ĉirkaŭe, kaj eĉ por Judujo, kiam Jerusalem
estos sieĝata. 3 En tiu tempo Mi faros Jerusalemon
peza ŝtono por ĉiuj popoloj: ĉiuj, kiuj ĝin levos, faros
al si vundojn; kaj kolektiĝos kontraŭ ĝi ĉiuj nacioj
de la tero. 4 En tiu tempo, diras la Eternulo, Mi
frapos ĉiun ĉevalon per rabio kaj ĝian rajdanton per
frenezeco; kaj sur la domon de Jehuda Mi malfermos
Miajn okulojn; ĉiujn ĉevalojn de la popoloj Mi frapos
per blindeco. 5 Kaj la estroj de Judujo diros en sia
koro: Mia forto estas la loĝantoj de Jerusalem, dank'
al la Eternulo Cebaot, ilia Dio. 6 En tiu tempo Mi faros
la estrojn de Judujo kiel pato kun fajro inter ligno
kaj kiel brulanta torĉo inter garboj, kaj ili formanĝos
dekstre kaj maldekstre ĉiujn popolojn ĉirkaŭe; kaj
Jerusalem estos denove priloĝata sur sia loko, en
Jerusalem. 7 Kaj antaŭe la Eternulo savos la tendojn
de Judujo, por ke la gloro de la domo de David kaj
la gloro de la loĝantoj de Jerusalem ne estu tro alta
super Judujo. 8 En tiu tempo la Eternulo defendos la
loĝantojn de Jerusalem, kaj la plej malforta el ili estos
en tiu tempo kiel David, kaj la domo de David estos
kiel Dio, kiel anĝelo de la Eternulo antaŭ ili. 9 En tiu
tempo Mi decidos ekstermi ĉiujn naciojn, kiuj atakas
Jerusalemon. 10 Sed sur la domon de David kaj sur la
loĝantojn de Jerusalem Mi verŝos spiriton de amo
kaj de preĝoj; kaj ili rigardos tiun, kiun ili trapikis,
kaj ili ploros pri li, kiel oni ploras pri solfilo, kaj ili
malĝojos pri li, kiel oni malĝojas pri unuenaskito. 11
En tiu tempo estos granda plorado en Jerusalem, kiel

la plorado en Hadadrimon en la valo de Megidon.
12 Ploros la lando, ĉiu familio aparte: la familio de
la domo de David aparte, kaj iliaj edzinoj aparte; la
familio de la domo de Natan aparte, kaj iliaj edzinoj
aparte; 13 la familio de la domo de Levi aparte, kaj
iliaj edzinoj aparte; la familio de la Ŝimeiidoj aparte,
kaj iliaj edzinoj aparte; 14 ĉiuj ceteraj familioj ĉiu
familio aparte, kaj iliaj edzinoj aparte.

**13** En tiu tempo malfermiĝos por la domo de David
kaj por la loĝantoj de Jerusalem fonto, por purigi
sin de pekoj kaj de malpureco. 2 En tiu tempo, diras la
Eternulo Cebaot, Mi ekstermos de la lando la nomojn
de la idoloj, kaj ili ne plu estos rememorataj; ankaŭ la
profetojn kaj la malpuran spiriton Mi forigos de la
lando. 3 Se iu tiam diros profetaĵon, tiam lia patro kaj
lia patrino, kiuj naskis lin, diros al li: Vi ne devas vivi,
ĉar vi parolis malveraĵon en la nomo de la Eternulo;
kaj lia patro kaj lia patrino, kiuj naskis lin, trapikos
lin, kiam li profetos. 4 En tiu tempo ĉiu el la profetoj
hontos pri sia vizio, kiam li volos profeti, kaj oni ne
metos sur sin harkovritan mantelon por trompi; 5 sed
ĉiu diros: Mi ne estas profeto, mi estas terkultivisto,
ĉar al la tero mi alkutimiĝis de mia infaneco. 6 Se
oni diros al li: Kio estas ĉi tiuj vundoj sur viaj manoj?
tiam li respondos: Oni batis min en la domo de miaj
amantoj. 7 Ho glavo, leviĝu kontraŭ Mian paŝtiston
kaj kontraŭ Mian plej proksiman amikon, diras la
Eternulo Cebaot; frapu la paŝtiston, por ke diskuru la
ŝafoj; kaj Mi returnos Mian manon al la malgranduloj.
8 Kaj sur la tuta tero, diras la Eternulo, du partoj estos
ekstermitaj kaj pereos, kaj la tria parto restos sur
ĝi. 9 Kaj tiun trian parton Mi trairigos tra fajro, kaj
refandos, kiel oni fandas arĝenton, kaj Mi elprovos
ilin, kiel oni elprovas oron. Ili vokos Mian nomon, kaj
Mi aŭskultos ilin, kaj Mi diros: Tio estas Mia popolo;
kaj ili diros: La Eternulo estas nia Dio.

**14** Jen de la Eternulo venos tago, kiam oni dividos
vian havaĵon meze de vi. 2 Mi kolektos ĉiujn
naciojn milite kontraŭ Jerusalemon, kaj la urbo estos
venkoprenita, la domoj estos detruitaj, la virinoj estos
senhonorigitaj, duono de la urbo iros en kaptitecon,
sed la cetera popolo ne estos ekstermita el la urbo. 3
Sed la Eternulo eliros kaj militos kontraŭ tiuj nacioj,
kiel iam Li militis en tago de batalo. 4 Liaj piedoj
en tiu tempo stariĝos sur la Monto de Olivoj, kiu
estas antaŭ Jerusalem oriente; kaj la Monto de Olivoj
disfendiĝos en la mezo en du partojn, de oriento ĝis
okcidento, tiel, ke fariĝos tre granda valo, unu duono
de la monto forŝoviĝos norden kaj la dua duono
suden. 5 Kaj vi kuros en la valo inter Miaj montoj, ĉar
la intermonta valo atingos ĝis Acel; vi kuros, kiel vi
kuris de la tertremo en la tempo de Uzija, reĝo de
Judujo; tiam venos la Eternulo, mia Dio, kune kun
ĉiuj sanktuloj. 6 En tiu tago ne estos lumo, sed estos
malvarmo kaj densa nebulo. 7 Kaj tio estos tago sola,
konata nur de la Eternulo, nek tago nek nokto; nur
vespere montriĝos lumo. 8 En tiu tago ekfluos viviga
akvo el Jerusalem, duono de ĝi al la maro orienta kaj
duono al la maro okcidenta; ĝi fluados en somero
kaj en vintro. 9 Kaj la Eternulo estos Reĝo super la
tuta tero; en tiu tempo la Eternulo estos sola, kaj Lia
nomo estos sola. 10 La tuta lando fariĝos ebenaĵo, de
Geba ĝis Rimon, sude de Jerusalem; ĉi tiu altiĝos kaj
staros sur sia loko, de la Pordego de Benjamen ĝis
la loko de la unua pordego, ĝis la Pordego Angula,
kaj de la turo de Ĥananel ĝis la reĝaj vinpremejoj. 11
Kaj oni loĝos en ĝi, kaj anatemo ne plu ekzistos; kaj
Jerusalem estos ekster ĉia danĝero. 12 Kaj tia estos la
plago, per kiu la Eternulo frapos ĉiujn popolojn, kiuj
batalis kontraŭ Jerusalem: ilia karno putros, kiam ili
staros ankoraŭ sur siaj piedoj, iliaj okuloj putros en
siaj kavoj, kaj ilia lango putros en ilia buŝo. 13 En tiu
tempo estos inter ili granda tumulto, venanta de la
Eternulo, kaj ĉiu kaptos la manon de sia proksimulo,
kaj leviĝos lia mano kontraŭ lian proksimulon. 14 Eĉ
Judujo militos kontraŭ Jerusalem, kaj oni kolektos
la havaĵon de ĉiuj nacioj ĉirkaŭe, tre multe da oro,
arĝento, kaj vestoj. 15 Tia sama plago estos sur la
ĉevaloj, muloj, kameloj, azenoj, kaj sur ĉiuj brutoj, kiuj
estos en tiuj tendaroj. 16 Ĉiuj restintoj el ĉiuj nacioj,
kiuj venis kontraŭ Jerusalemon, venados ĉiujare, por
adorkliniĝi antaŭ la Reĝo, la Eternulo Cebaot, kaj por
festi la feston de laŭboj. 17 Se iu el la gentoj de la
tero ne iros en Jerusalemon, por adorkliniĝi antaŭ la
Reĝo, la Eternulo Cebaot, tiam ili ne havos pluvon
super si. 18 Se la gento Egipta, kiu ne havas pluvon,
ne iros kaj ne venos, trafos ilin la plago, per kiu la
Eternulo frapos tiujn naciojn, kiuj ne venos, por festi
la feston de laŭboj. 19 Tio estos puno de Egiptujo,
kaj puno de ĉiuj nacioj, se ili ne iros, por festi la
feston de laŭboj. 20 En tiu tempo sur la tintiloj de
la ĉevaloj estos skribite: SANKTA AL LA ETERNULO;
kaj la kaldronoj en la domo de la Eternulo estos kiel

la kalikoj antaŭ la altaro. 21 Kaj ĉiuj kaldronoj en
Jerusalem kaj en Judujo estos sanktaj al la Eternulo
Cebaot; kaj ĉiuj oferontoj venos kaj prenos el ili kaj
kuiros en ili; kaj ne plu estos komercisto en la domo
de la Eternulo Cebaot en tiu tempo.

# Malaĥi

1 Profeta vorto de la Eternulo al Izrael per Malaĥi.
2 Mi ekamis vin, diras la Eternulo. Vi demandas: En
kio Vi nin ekamis? Ĉu Esav ne estas frato de Jakob?
diras la Eternulo; tamen Mi ekamis Jakobon, 3 kaj
Esavon mi malamis, kaj Mi dezertigis liajn montojn,
kaj lian posedaĵon Mi donis al la ŝakaloj de la dezerto.
4 Se la Edomidoj diras: Ni estas ruinigitaj, sed ni
revenos kaj rekonstruos la ruinojn — la Eternulo
Cebaot diras tiele: Ili konstruos, kaj Mi detruos, kaj
oni nomos ilin lando de malpieco, kaj popolo, kontraŭ
kiu la Eternulo koleras eterne. 5 Viaj okuloj tion vidos,
kaj vi diros: Granda estas la Eternulo super la limoj de
Izrael. 6 Filo respektas patron, kaj sklavo sian sinjoron;
sed se Mi estas patro, kie estas la respekto al Mi? kaj
se Mi estas sinjoro, kie estas la timo antaŭ Mi? diras
la Eternulo Cebaot al vi, ho pastroj, kiuj malhonoras
Mian nomon. Kaj vi diras: Per kio ni malhonoras
Vian nomon? 7 Vi alportas sur Mian altaron panon
malpuran, kaj tamen vi diras: Per kio ni malpuriĝis
antaŭ Vi? Per tio, ke vi diras: La tablo de la Eternulo
estas senvalora. 8 Kaj kiam vi alportas oferon blindan,
ĉu tio ne estas malbona? aŭ kiam vi alportas laman aŭ
malsanan, ĉu tio ne estas malbona? Provu alporti ĝin
al via regionestro — ĉu vi tiam plaĉos al li, kaj ĉu li
akceptos vin favore? diras la Eternulo Cebaot. 9 Preĝu
de nun al Dio, ke Li indulgu nin; se tio estas farita
de viaj manoj, ĉu Li povas favore akcepti vin? diras
la Eternulo Cebaot. 10 Estus bone, se iu el vi ŝlosus
la pordon, por ke vi ne bruligu vane fajron sur Mia
altaro. Vi ne estas agrablaj al Mi, diras la Eternulo
Cebaot; kaj donacon el via mano Mi ne akceptos
favore. 11 Ĉar de la sunleviĝejo ĝis la sunsubirejo
Mia nomo estos granda inter la nacioj, kaj sur ĉiu
loko oni incensos kaj alportos oferojn al Mia nomo,
oferojn purajn; ĉar granda estos Mia nomo inter la
nacioj, diras la Eternulo Cebaot. 12 Sed vi malhonoras
ĝin per tio, ke vi diras: La tablo de la Eternulo estas
malsankta, kaj la manĝaĵo sur ĝi estas senvalora. 13
Kaj vi diras: Tio estas nur klopodoj! Kaj vi malŝatas
tion, diras la Eternulo Cebaot, kaj vi alportas tion, kio
estas ŝtelita, lama, aŭ malsana, kaj vi alportas ankaŭ
tiaspecan farunoferon. Ĉu Mi povas favore akcepti
tion el via mano? diras la Eternulo. 14 Malbenata estu
la hipokritulo, kiu havas en sia brutaro sendifektan
virbruton, sed, farinte sanktan promeson, li alportas
ofere al la Sinjoro kriplaĵon; ĉar Mi estas Reĝo granda,
diras la Eternulo Cebaot, kaj Mia nomo estas timata
inter la nacioj.

2 Kaj nun, ho pastroj, al vi estas donata jena ordono:
2 Se vi ne obeos, kaj se vi ne atentos, ke vi donadu
honoron al Mia nomo, diras la Eternulo Cebaot, tiam
Mi sendos sur vin malbenon, Mi malbenos viajn
benojn; jes, Mi tion malbenos pro tio, ke vi ne donas
vian atenton. 3 Jen Mi ĵetos insulton sur la semon ĉe vi,
malpuraĵon Mi ĵetos sur viajn vizaĝojn, la malpuraĵon
de viaj festoferoj, kaj ĝi algluiĝos al vi. 4 Kaj vi scios,
ke Mi sendis al vi ĉi tiun ordonon, por konservi Mian
interligon kun Levi, diras la Eternulo Cebaot. 5 Mia
interligo kun li estis por vivo kaj paco, kaj Mi donis ilin
al li, por ke li timu Min, kaj li timis Min kaj respektegis
Mian nomon. 6 Instruo de la vero estis en lia buŝo,
kaj maljustaĵo ne troviĝis sur liaj lipoj; en paco kaj
sincereco li iradis antaŭ Mi, kaj multajn li deturnis de
peko. 7 Ĉar la lipoj de pastro devas konservi scion,
kaj el lia buŝo oni devas serĉi instruon; ĉar li estas
sendito de la Eternulo Cebaot. 8 Sed vi forkliniĝis de
la vojo, vi delogis multajn de la instruo, vi detruis
la interligon kun Levi, diras la Eternulo Cebaot. 9
Tial Mi ankaŭ faris vin malestimataj kaj malaltigataj
antaŭ la tuta popolo, pro tio, ke vi ne observas Miajn
vojojn kaj estas personfavoraj en la aferoj de la leĝo.
10 Ĉu ne unu patron ni ĉiuj havas? ĉu ne unu Dio nin
kreis? kial ni perfidas unu la alian, malsanktigante
la interligon de niaj patroj? 11 Perfidis Jehuda, kaj
abomenaĵo estas farita en Izrael kaj en Jerusalem; ĉar
Jehuda malhonoris la sanktaĵon de la Eternulo per tio,
ke li ekamis kaj edzinigis al si filinon de fremda dio.
12 Al tiu, kiu tion faras, la Eternulo ekstermos el la
tendoj de Jakob majstron kaj disĉiplon, kaj ankaŭ tiun,
kiu alportas donon al la Eternulo Cebaot. 13 Ankaŭ
tion vi faras: vi kovras la altaron de la Eternulo per
larmoj, plorado, kaj ĝemado tiel, ke Li jam ne povas
rigardi la donojn nek akcepti ion agrable el via mano.
14 Vi diras: Kial? Tial, ke la Eternulo estas atestanto
inter vi kaj la edzino de via juneco, kontraŭ kiu vi
agis perfide, kvankam ŝi estas via kamaradino kaj via
leĝa edzino. 15 Tion ne faris eĉ seninfanulo, se en li
restis spirito. Kion faris la seninfanulo? li petis de
Dio idaron. Estu do singardaj en via spirito, kaj neniu
agu perfide kontraŭ la edzino de sia juneco. 16 Kiu
elmalamis ŝin kaj forpuŝas ŝin, diras la Eternulo, Dio

de Izrael, tiu makulas sian veston per perfortaĵo, diras
la Eternulo Cebaot: estu do singardaj en via spirito,
kaj ne agu perfide. 17 Vi indignigis la Eternulon per
viaj vortoj. Tamen vi diras: Per kio ni indignigis Lin?
Per tio, ke vi diras: Ĉiu malbonaganto estas bona
antaŭ la okuloj de la Eternulo, kaj tiajn Li favoras; aŭ:
Kie estas la Dio de justeco?

3 Jen Mi sendos Mian anĝelon, kaj li preparos antaŭ
Mi la vojon; kaj subite venos en Sian templon la
Sinjoro, kiun vi serĉas; kaj la anĝelo de la interligo,
kiun vi deziras, jen li iras, diras la Eternulo Cebaot. 2
Sed kiu eltenos la tagon de Lia veno? kaj kiu povos
stari, kiam Li aperos? Ĉar Li estas kiel la fajro de
fandisto, kaj kiel la sapo de la fulistoj. 3 Li sidiĝos, por
refandi kaj purigi arĝenton, kaj Li purigos la idojn
de Levi kaj refandos ilin kiel oron kaj arĝenton, por
ke ili alportadu al la Eternulo la donojn kun pieco. 4
Tiam al la Eternulo estos agrablaj la oferoj de Jehuda
kaj de Jerusalem, kiel en la tempo antikva kaj kiel
en la jaroj antaŭaj. 5 Kaj Mi venos al vi, por juĝi;
kaj Mi estos rapida atestanto kontraŭ la sorĉistoj kaj
adultuloj, kontraŭ tiuj, kiuj ĵuras mensoge, kontraŭ
tiuj, kiuj estas maljustaj en la pagado al dungito, al
vidvino kaj al orfo, kaj kontraŭ tiuj, kiuj forklinas la
rajton de fremdulo kaj Min ne timas, diras la Eternulo
Cebaot. 6 Ĉar Mi, la Eternulo, ne ŝanĝiĝas; kaj vi, ho
filoj de Jakob, ne neniiĝos. 7 De post la tagoj de viaj
patroj vi deturnis vin de Miaj leĝoj kaj ne observas
ilin; revenu al Mi, kaj tiam Mi returnos Min al vi,
diras la Eternulo Cebaot. Sed vi diras: En kio ni devas
reveni? 8 Ĉu povas homo ruzi kontraŭ Dio? tamen vi
ruzas kontraŭ Mi. Vi diras: En kio ni ruzas kontraŭ
Vi? En la dekonaĵo kaj la oferdonoj. 9 Sub la malbeno
vi ruiniĝas, sed kontraŭ Mi vi ruzas, la tuta popolo. 10
Alportu la tutan dekonaĵon en la provizejon, por ke
estu manĝaĵo en Mia domo, kaj elprovu Min per tio,
diras la Eternulo Cebaot, ĉu Mi ne malfermos al vi
la aperturon de la ĉielo kaj ĉu Mi ne verŝos sur vin
benon abundan. 11 Tiam Mi faros por vi malpermeson
al la manĝeganto, ke li ne pereigu al vi la fruktojn
de la tero kaj ne senfruktigu al vi la vinberbranĉojn
sur la kampo, diras la Eternulo Cebaot. 12 Kaj ĉiuj
nacioj nomos vin feliĉaj, ĉar vi estos lando ravanta,
diras la Eternulo Cebaot. 13 Arogantaj estas kontraŭ
Mi viaj vortoj, diras la Eternulo. Tamen vi diras:
Kion ni parolas kontraŭ Vi? 14 Vi parolas: Vane ni
servas al Dio: kian profiton ni havas, se ni plenumas
Liajn preskribojn kaj se ni iradas senĝoje antaŭ la
Eternulo Cebaot? 15 Tial ni diras, ke la malbonuloj
estas feliĉaj, kaj la malpiuloj estas bone aranĝitaj; ili
incitas Dion, sed restas sendifektaj. 16 Sed tiuj, kiuj
timas la Eternulon, diras al si reciproke: La Eternulo
atentas kaj aŭdas, kaj memorlibro estas skribata antaŭ
Li pri tiuj, kiuj timas la Eternulon kaj respektas Lian
nomon. 17 Kaj ili estos Miaj, diras la Eternulo Cebaot,
en la tago, kiam Mi aranĝos Mian apartan trezoron;
kaj Mi korfavoros ilin, kiel homo korfavoras sian filon,
kiu servas al li. 18 Kaj vi denove vidos la diferencon
inter virtulo kaj malvirtulo, inter tiu, kiu servas al
Dio, kaj tiu, kiu ne servas al Li.

4 Ĉar jen venos tago, ardanta kiel forno; tiam ĉiuj
malhumiluloj kaj malbonaguloj estos kiel pajlo, kaj
la venonta tago bruligos ilin tiel, diras la Eternulo
Cebaot, ke ĝi ne restigos al ili radikon nek branĉon.
2 Sed por vi, kiuj respektas Mian nomon, leviĝos
suno de justeco, kaj sanigo estos en ĝiaj radioj, kaj vi
eliros kaj saltados, kiel bone nutritaj bovidoj. 3 Kaj vi
piedpremos la malpiulojn, ĉar ili estos polvo sub la
plandoj de viaj piedoj en tiu tago, kiun Mi aranĝos,
diras la Eternulo Cebaot. 4 Memoru la instruon de
Mia servanto Moseo, kiun Mi donis al li sur Ĥoreb
por la tuta Izrael, la leĝojn kaj preskribojn. 5 Jen Mi
sendos al vi la profeton Elija, antaŭ ol venos la granda
kaj timinda tago de la Eternulo; 6 kaj li returnos la
koron de la patroj al la infanoj, kaj la koron de la
infanoj al iliaj patroj, por ke Mi, veninte, ne frapu la
teron per anatemo.

# NOVA TESTAMENTO




*Kaj Jesuo diris: Patro, pardonu ilin; ĉar ili ne scias, kion ili faras.*
*Kaj dividante inter si liajn vestojn, ili ĵetis lotojn.*
Luko 23:34

# Mateo

**1** La genealogia registro de Jesuo Kristo, filo de
David, filo de Abraham. 2 Al Abraham naskiĝis
Isaak, kaj al Isaak naskiĝis Jakob, kaj al Jakob naskiĝis
Jehuda kaj liaj fratoj, 3 kaj al Jehuda naskiĝis Perec
kaj Zeraĥ el Tamar, kaj al Perec naskiĝis Ĥecron,
kaj al Ĥecron naskiĝis Ram, 4 kaj al Ram naskiĝis
Aminadab, kaj al Aminadab naskiĝis Naĥŝon, kaj al
Naĥŝon naskiĝis Salma, 5 kaj al Salma naskiĝis Boaz
el Raĥab, kaj al Boaz naskiĝis Obed el Rut, kaj al
Obed naskiĝis Jiŝaj, 6 kaj al Jiŝaj naskiĝis David, la
reĝo. Kaj al David naskiĝis Salomono el la edzino de
Urija, 7 kaj al Salomono naskiĝis Reĥabeam, kaj al
Reĥabeam naskiĝis Abija, kaj al Abija naskiĝis Asa, 8
kaj al Asa naskiĝis Jehoŝafat, kaj al Jehoŝafat naskiĝis
Joram, kaj al Joram naskiĝis Uzija, 9 kaj al Uzija
naskiĝis Jotam, kaj al Jotam naskiĝis Aĥaz, kaj al Aĥaz
naskiĝis Ĥizkija, 10 kaj al Ĥizkija naskiĝis Manase,
kaj al Manase naskiĝis Amon, kaj al Amon naskiĝis
Joŝija, 11 kaj al Joŝija naskiĝis Jeĥonja kaj liaj fratoj, je
la tempo de la transloĝiĝo en Babelon. 12 Kaj post la
transloĝiĝo en Babelon, al Jeĥonja naskiĝis Ŝealtiel,
kaj al Ŝealtiel naskiĝis Zerubabel, 13 kaj al Zerubabel
naskiĝis Abiud, kaj al Abiud naskiĝis Eljakim, kaj al
Eljakim naskiĝis Azor, 14 kaj al Azor naskiĝis Cadok,
kaj al Cadok naskiĝis Aĥim, kaj al Aĥim naskiĝis Eliud,
15 kaj al Eliud naskiĝis Eleazar, kaj al Eleazar naskiĝis
Mattan, kaj al Mattan naskiĝis Jakob, 16 kaj al Jakob
naskiĝis Jozef, edzo de Maria, el kiu estis naskita
Jesuo, kiu estas nomata Kristo. 17 Tial ĉiuj generacioj
de Abraham ĝis David estas dek kvar generacioj,
kaj de David ĝis la transloĝiĝo en Babelon dek kvar
generacioj, kaj de la transloĝiĝo en Babelon ĝis la
Kristo dek kvar generacioj. 18 Kaj la naskiĝo de Jesuo
Kristo estis tiamaniere: kiam lia patrino Maria estis
fianĉinigita al Jozef, antaŭ ol ili kunvenis, ŝi troviĝis
graveda per la Sankta Spirito. 19 Kaj ŝia edzo Jozef,
estante justulo, kaj ne volante meti ŝin al publika
malhonoro, volis ŝin sekrete forsendi. 20 Sed kiam li
pripensis tion, jen anĝelo de la Eternulo aperis al li
en sonĝo, dirante: Jozef, filo de David, ne timu preni
al vi vian edzinon Maria; ĉar tio, kio naskiĝos de ŝi,
estas per la Sankta Spirito. 21 Kaj ŝi naskos filon; kaj
vi nomos lin JESUO; ĉar li savos sian popolon de ĝiaj
pekoj. 22 Kaj ĉio tio okazis, por ke plenumiĝu tio,
kion la Eternulo parolis per la profeto, dirante: 23 Jen
virgulino gravediĝos kaj naskos filon, Kaj oni donos
al li la nomon Emanuel; tio estas, Dio kun ni. 24 Kaj
Jozef, leviĝinte el sia dormo, faris, kiel ordonis al li la
anĝelo de la Eternulo, kaj prenis al si sian edzinon; 25
kaj li ne ekkonis ŝin, ĝis ŝi naskis filon; kaj li donis al
li la nomon JESUO.

**2** Kaj kiam Jesuo estis naskita en Bet-Leĥem de Judujo
en la tempo de la reĝo Herodo, jen saĝuloj el la
oriento venis al Jerusalem, dirante: 2 Kie estas tiu, kiu
estas naskita Reĝo de la Judoj? ĉar ni vidis lian stelon
en la oriento, kaj venis, por adorkliniĝi al li. 3 Kaj
kiam la reĝo Herodo tion aŭdis, li maltrankviliĝis,
kaj la tuta Jerusalem kun li. 4 Kaj kunveniginte ĉiujn
ĉefpastrojn kaj skribistojn de la popolo, li demandis al
ili, kie la Kristo devas naskiĝi. 5 Kaj ili diris al li: En
Bet-Leĥem de Judujo, ĉar per la profeto estas skribite
jene: 6 Kaj vi, ho Bet-Leĥem, lando de Judujo, Neniel
estas plej malgranda inter la regantoj de Judujo; Ĉar
el vi venos reganto, Kiu paŝtos Mian popolon Izrael. 7
Tiam Herodo sekrete venigis la saĝulojn, kaj precize
sciiĝis de ili pri la tempo, kiam aperis la stelo. 8 Kaj li
sendis ilin al Bet-Leĥem, dirante: Iru kaj elserĉu zorge
pri la knabeto; kaj kiam vi lin trovos, sciigu al mi, por
ke mi ankaŭ venu kaj adorkliniĝu al li. 9 Kaj aŭdinte
la reĝon, ili ekvojiris; kaj jen la stelo, kiun ili vidis en
la oriento, antaŭiris ilin, ĝis ĝi venis kaj staris super
la loko, kie estis la juna knabeto. 10 Kaj vidante la
stelon, ili ĝojis kun tre granda ĝojo. 11 Kaj veninte en
la domon, ili vidis la knabeton kun lia patrino Maria,
kaj adorkliniĝis al li; kaj malferminte siajn trezorojn,
ili faligis sin kaj prezentis al li donacojn: oron kaj
olibanon kaj mirhon. 12 Kaj avertite de Dio en sonĝo,
ke ili ne iru returne al Herodo, ili foriris per alia vojo
al sia lando. 13 Kaj post ilia foriro jen anĝelo de la
Eternulo aperis en sonĝo al Jozef, dirante: Leviĝu, kaj
prenu la knabeton kaj lian patrinon, kaj forrapidu
en Egiptujon, kaj restu tie, ĝis mi parolos al vi; ĉar
Herodo serĉos la knabeton, por lin pereigi. 14 Kaj
li leviĝis, kaj prenis la knabeton kaj lian patrinon
nokte, kaj migris en Egiptujon, 15 kaj restis tie ĝis
la morto de Herodo; por ke plenumiĝu tio, kion la
Eternulo parolis per la profeto, dirante: El Egiptujo
Mi vokis Mian filon. 16 Tiam Herodo, ekvidinte, ke li
estas trompita de la saĝuloj, tre koleris; kaj sendinte,
li mortigis ĉiujn knabojn en Bet-Leĥem kaj en ĉiuj
ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, havantajn du jarojn aŭ malpli, laŭ

la tempo, pri kiu li precize sciiĝis de la saĝuloj. 17
Tiam plenumiĝis tio, kio estis dirita per la profeto
Jeremia, nome: 18 Voĉo estas aŭdita en Rama, Ĝemado
kaj maldolĉa plorado, Raĥel priploras siajn infanojn,
Kaj ŝi ne volas konsoliĝi, ĉar ili forestas. 19 Sed kiam
Herodo mortis, jen anĝelo de la Eternulo aperis en
sonĝo al Jozef en Egiptujo, dirante: 20 Leviĝu, kaj
prenu la knabeton kaj lian patrinon, kaj iru en la
landon de Izrael; ĉar mortis tiuj, kiuj atencis la vivon
de la knabeto. 21 Kaj li leviĝis, kaj prenis la knabeton
kaj lian patrinon, kaj venis en la landon de Izrael. 22
Sed kiam li aŭdis, ke Arĥelao reĝas en Judujo anstataŭ
sia patro Herodo, li timis iri tien; kaj avertite de Dio
en sonĝo, li fortiris sin en la regionojn de Galileo, 23
kaj venis al kaj loĝis en urbo nomata Nazaret, por ke
plenumiĝu tio, kio estis dirita per la profetoj, ke li
estos nomata Nazaretano.

**3** En tiuj tagoj venis Johano, la Baptisto, predikante
en la dezerto de Judujo, 2 kaj dirante: Pentu, ĉar
alproksimiĝis la regno de la ĉielo. 3 Ĉar li estas tiu, pri
kiu estis dirite per la profeto Jesaja: Voĉo de krianto
en la dezerto: Pretigu la vojon de la Eternulo, Rektigu
Liajn irejojn. 4 Kaj tiu Johano havis sian vestaĵon el
kamelaj haroj, kaj ledan zonon ĉirkaŭ siaj lumboj, kaj
lia nutraĵo estis akridoj kaj sovaĝa mielo. 5 Tiam eliris
al li Jerusalem kaj la tuta Judujo kaj la tuta ĉirkaŭaĵo
de Jordan; 6 kaj ili estis baptitaj de li en la rivero
Jordan, konfesante siajn pekojn. 7 Kaj vidante multajn
el la Fariseoj kaj Sadukeoj venantajn al lia baptado, li
diris al ili: Ho vipuridoj! kiu vin avertis forkuri de la
venonta kolero? 8 Donu do fruktojn taŭgajn por pento;
9 kaj ne pensu diri en vi: Ni havas Abrahamon kiel
patron; ĉar mi diras al vi, ke Dio povas el ĉi tiuj ŝtonoj
starigi idojn al Abraham. 10 Kaj jam la hakilo kuŝas
ĉe la radiko de la arboj; tial ĉiu arbo, kiu ne donas
bonan frukton, estas dehakata, kaj ĵetata en fajron.
11 Mi ja vin baptas per akvo por pento; sed tiu, kiu
venas post mi, estas pli potenca ol mi; liajn ŝuojn mi
ne estas inda porti; li vin baptos per la Sankta Spirito
kaj per fajro; 12 lia ventumilo estas en lia mano, kaj li
elpurigos sian draŝejon, kaj li kolektos sian tritikon
en la grenejon; sed la grenventumaĵon li bruligos per
fajro neestingebla. 13 Tiam venis Jesuo el Galileo al
Jordan al Johano, por esti baptata de li. 14 Sed tiu lin
malakceptis, dirante: Mi bezonas esti baptata de vi,
kaj ĉu vi venas al mi? 15 Sed Jesuo responde diris al li:
Lasu do, ĉar tiel decas al ni plenumi ĉian justecon.
Tiam li lasis lin. 16 Kaj Jesuo, baptite, supreniris tuj
el la akvo; kaj jen la ĉielo malfermiĝis, kaj li vidis la
Spiriton de Dio malsuprenirantan kiel kolombo, kaj
venantan sur lin; 17 kaj jen voĉo el la ĉielo, dirante: Ĉi
tiu estas Mia Filo, la amata, en kiu Mi havas plezuron.

**4** Tiam Jesuo estis kondukita supren de la Spirito
en la dezerton, por esti tentata de la diablo. 2 Kaj
fastinte kvardek tagojn kaj kvardek noktojn, li poste
malsatis. 3 Kaj la tentanto venis, kaj diris al li: Se vi
estas Filo de Dio, ordonu, ke tiuj ŝtonoj fariĝu panoj.
4 Sed responde li diris: Estas skribite: Ne per la pano
sole vivas homo, sed per ĉiu vorto, kiu eliras el la
buŝo de Dio. 5 Poste la diablo portis lin en la sanktan
urbon, kaj starigis lin sur la tegmenta pinto de la
templo, 6 kaj diris al li: Se vi estas Filo de Dio, ĵetu
vin malsupren, ĉar estas skribite: Al Siaj anĝeloj Li
ordonos pri vi, Kaj sur la manoj ili vin portos, Por ke
vi ne falpuŝiĝu sur ŝtono per via piedo. 7 Jesuo diris
al li: Ankaŭ estas skribite: Ne provu la Eternulon, vian
Dion. 8 Denove la diablo portis lin al monto tre alta,
kaj montris al li ĉiujn regnojn de la mondo kaj ilian
gloron, 9 kaj diris al li: Ĉion tion mi donos al vi, se vi
faligos vin kaj adorkliniĝos al mi. 10 Tiam Jesuo diris
al li: Foriru, Satano! ĉar estas skribite: Al la Eternulo,
via Dio, vi adorkliniĝu, kaj al Li sola vi servu. 11 Tiam
la diablo forlasis lin, kaj jen anĝeloj venis kaj servadis
al li. 12 Kaj aŭdinte, ke Johano estas arestita, li foriris
en Galileon; 13 kaj lasinte Nazareton, li venis al kaj
loĝis en Kapernaum apudmara, en la limoj de Zebulun
kaj Naftali; 14 por ke plenumiĝu tio, kio estis dirita
per la profeto Jesaja, nome: 15 Lando de Zebulun
kaj lando de Naftali, Laŭvoje de la maro, transe de
Jordan, Galileo de la nacioj, 16 La popolo, sidanta
en mallumo, Ekvidis grandan lumon, Kaj al homoj,
sidantaj en lando de ombra morto, ekbrilis lumo. 17
De tiam Jesuo komencis prediki, kaj diri: Pentu, ĉar la
regno de la ĉielo alproksimiĝis. 18 Kaj piedirante apud
la maro de Galileo, li vidis du fratojn, Simonon, kiu
estis nomata Petro, kaj Andreon, lian fraton, ĵetantajn
reton en la maron, ĉar ili estis fiŝkaptistoj. 19 Kaj li
diris al ili: Venu post mi, kaj mi faros vin kaptistoj de
homoj. 20 Kaj ili tuj forlasis la retojn, kaj sekvis lin.
21 Kaj antaŭenirinte de tie, li vidis aliajn du fratojn,
Jakobon, filon de Zebedeo, kaj Johanon, lian fraton,
en la ŝipeto kun ilia patro Zebedeo, riparantajn siajn

retojn; kaj li vokis ilin. 22 Kaj ili tuj forlasis la ŝipeton
kaj sian patron, kaj sekvis lin. 23 Kaj Jesuo trairis
tra la tuta Galileo, instruante en iliaj sinagogoj, kaj
predikante la evangelion de la regno, kaj kuracante
ĉian malsanon kaj ĉian malfortaĵon inter la popolo.
24 Kaj lia famo disvastiĝis en la tuta Sirio; kaj oni
alkondukis al li ĉiujn malsanulojn, malfortigitajn de
diversaj malsanoj kaj turmentoj, demonhavantojn,
epilepsiulojn, kaj paralizulojn, kaj li resanigis ilin.
25 Kaj grandaj homamasoj lin sekvis el Galileo kaj
Dekapolis kaj Jerusalem kaj Judujo kaj el trans Jordan.

5 Kaj vidinte la homamasojn, li supreniris sur la
monton, kaj kiam li sidiĝis, liaj disĉiploj venis al li;
2 kaj malferminte la buŝon, li instruis ilin, dirante:
3 Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la
regno de la ĉielo. 4 Feliĉaj estas la plorantaj, ĉar ili
konsoliĝos. 5 Feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos
la teron. 6 Feliĉaj estas tiuj, kiuj malsatas kaj soifas
justecon, ĉar ili satiĝos. 7 Feliĉaj estas la kompatemaj,
ĉar ili ricevos kompaton. 8 Feliĉaj estas la kore puraj,
ĉar ili vidos Dion. 9 Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar
filoj de Dio ili estos nomataj. 10 Feliĉaj estas tiuj, kiuj
estas persekutitaj pro justeco, ĉar ilia estas la regno
de la ĉielo. 11 Feliĉaj estas vi, kiam oni vin riproĉos
kaj persekutos kaj false vin kalumnios pro mi. 12
Ĝoju kaj raviĝu, ĉar via rekompenco estos granda
en la ĉielo; ĉar tiel oni persekutis la profetojn, kiuj
estis antaŭ vi. 13 Vi estas la salo de la tero; sed se la
salo sengustiĝis, per kio ĝi estos salita? ĝi jam taŭgas
por nenio, krom por esti elĵetita kaj piedpremita de
homoj. 14 Vi estas la lumo de la mondo. Urbo starigita
sur monto ne povas esti kaŝita. 15 Kiam oni bruligas
lampon, oni metas ĝin ne sub grenmezurilon, sed sur
la lampingon; kaj ĝi lumas sur ĉiujn, kiuj estas en
la domo. 16 Tiel same via lumo lumu antaŭ homoj,
por ke ili vidu viajn bonajn farojn, kaj gloru vian
Patron, kiu estas en la ĉielo. 17 Ne pensu, ke mi venis,
por detrui la leĝon aŭ la profetojn; mi venis, ne por
detrui, sed por plenumi. 18 Vere mi diras al vi: Ĝis
la ĉielo kaj la tero forpasos, nek unu joto nek unu
streketo forpasos de la leĝo, ĝis ĉio plenumiĝos. 19
Tial, kiu malobservos unu el ĉi tiuj plej malgrandaj
ordonoj kaj tiel instruos homojn, tiu estos nomata la
plej malgranda en la regno de la ĉielo; sed kiu faros
ilin kaj instruos, tiu estos nomata granda en la regno
de la ĉielo. 20 Ĉar mi diras al vi, ke se via justeco ne
superos la justecon de la skribistoj kaj la Fariseoj, vi
tute ne eniros en la regnon de la ĉielo. 21 Vi aŭdis,
ke estas dirite al la antikvuloj: Ne mortigu, kaj kiu
mortigos, tiu estos en danĝero de juĝado; 22 sed mi
diras al vi, ke kiu koleras kontraŭ sia frato, tiu estos
en danĝero de juĝado; kaj kiu diros al sia frato: Raka,
tiu estos en danĝero de la sinedrio; kaj kiu diros:
Malsaĝulo, tiu estos en danĝero de Gehena de fajro.
(Geenna g1067) 23 Tial, se vi prezentas vian oferon ĉe la
altaro, kaj tie memoras, ke via frato havas ion kontraŭ
vi, 24 lasu tie vian oferon antaŭ la altaro, kaj foriru,
unue paciĝu kun via frato, kaj poste venu kaj prezentu
vian oferon. 25 Konsentu rapide kun via kontraŭulo,
dum vi estas kun li sur la vojo, por ke la kontraŭulo
ne transdonu vin al la juĝisto, kaj la juĝisto al la
subulo, kaj por ke vi ne estu ĵetita en malliberejon. 26
Vere mi diras al vi, ke vi neniel eliros el tie, ĝis vi
pagos la lastan kodranton. 27 Vi aŭdis, ke estas dirite:
Ne adultu; 28 sed mi diras al vi, ke ĉiu, kiu rigardas
virinon, por deziri ŝin, jam adultis je ŝi en sia koro. 29
Kaj se via dekstra okulo faligas vin, elŝiru kaj forĵetu
ĝin; ĉar estus pli bone por vi, se unu el viaj membroj
pereus, ol se via tuta korpo estus ĵetita en Gehenan.
(Geenna g1067) 30 Kaj se via dekstra mano faligas vin,
detranĉu kaj forĵetu ĝin; ĉar estus pli bone por vi,
se unu el viaj membroj pereus, ol se via tuta korpo
irus en Gehenan. (Geenna g1067) 31 Estas ankaŭ dirite:
Kiu forsendos sian edzinon, tiu donu al ŝi eksedzigan
leteron; 32 sed mi diras al vi, ke ĉiu, kiu forsendas
sian edzinon, krom pro malĉasteco, igas ŝin adulti;
kaj kiu edziĝos kun forsenditino, tiu adultas. 33 Plue,
vi aŭdis, ke estas dirite al la antikvuloj: Ne rompu
ĵurojn, sed plenumu viajn ĵurojn antaŭ la Eternulo;
34 sed mi diras al vi: Tute ne ĵuru; nek per la ĉielo,
ĉar ĝi estas la trono de Dio; 35 nek per la tero, ĉar ĝi
estas la benketo de Liaj piedoj; nek per Jerusalem,
ĉar ĝi estas urbo de la granda Reĝo. 36 Nek ĵuru per
via kapo, ĉar vi ne povas fari eĉ unu haron blanka
aŭ nigra. 37 Sed via parolo estu: Jes, jes, ne, ne; ĉio
ekster tio estas el malbono. 38 Vi aŭdis, ke estas dirite:
Okulon pro okulo, kaj denton pro dento; 39 sed mi
diras al vi: Ne rezistu al malbono; sed al tiu, kiu frapas
vian dekstran vangon, turnu ankaŭ la alian. 40 Kaj
se iu deziras procesi kontraŭ vi, por forpreni vian
tunikon, lasu lin preni ankaŭ vian mantelon. 41 Kaj se
iu devigas vin iri unu mejlon, iru kun li du. 42 Donu
al tiu, kiu petas de vi; kaj ne deturnu vin de tiu, kiu

deziras prunti de vi. 43 Vi aŭdis, ke estas dirite: Amu
vian proksimulon, kaj malamu vian malamikon; 44
sed mi diras al vi: Amu viajn malamikojn, kaj preĝu
por viaj persekutantoj; 45 por ke vi estu filoj de via
Patro, kiu estas en la ĉielo; ĉar Li levas Sian sunon sur
la malbonulojn kaj bonulojn, kaj sendas pluvon sur la
justulojn kaj la maljustulojn. 46 Ĉar se vi amas tiujn,
kiuj amas vin, kian rekompencon vi havas? ĉu ne tion
saman faras eĉ la impostistoj? 47 Kaj se vi salutas nur
sole viajn fratojn, kion ekstran vi faras? ĉu ne tion
saman faras eĉ la nacianoj? 48 Estu do perfektaj, kiel
ankaŭ via ĉiela Patro estas perfekta.

6 Gardu vin, ke vi ne faru vian justaĵon antaŭ
homoj, por esti alrigardataj de ili; alie vi ne havas
rekompencon ĉe via Patro, kiu estas en la ĉielo. 2
Tial, kiam vi donos almozon, ne sonigu trumpeton
antaŭ vi, kiel faras la hipokrituloj en la sinagogoj
kaj sur la stratoj, por havi gloron ĉe homoj. Vere mi
diras al vi: Ili jam ricevas sian rekompencon. 3 Sed
kiam vi donas almozon, ne lasu vian maldekstran
manon scii, kion faras via dekstra; 4 por ke via almozo
estu en sekreto; kaj via Patro, kiu vidas en sekreto,
vin rekompencos. 5 Kaj kiam vi preĝas, ne estu kiel
la hipokrituloj; ĉar ili amas preĝi, starante en la
sinagogoj kaj ĉe la anguloj de la stratoj, por montri
sin al homoj. Vere mi diras al vi: Ili jam ricevas sian
rekompencon. 6 Sed vi, kiam vi preĝas, eniru en vian
ĉambreton, kaj ŝlosinte vian pordon, preĝu al via
Patro, kiu estas en sekreto; kaj via Patro, kiu vidas en
sekreto, vin rekompencos. 7 Kaj dum via preĝado ne
vante ripetadu, kiel la nacianoj; ĉar ili supozas, ke
ili estos aŭskultitaj pro sia multvorteco. 8 Ne estu
similaj al ili; ĉar via Patro scias, kion vi bezonas, antaŭ
ol vi petas de Li. 9 Vi do preĝu jene: Patro nia, kiu
estas en la ĉielo, Via nomo estu sanktigita. 10 Venu
Via regno, plenumiĝu Via volo, kiel en la ĉielo, tiel
ankaŭ sur la tero. 11 Nian panon ĉiutagan donu al ni
hodiaŭ. 12 Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ
ni pardonas al niaj ŝuldantoj. 13 Kaj ne konduku nin
en tenton, sed liberigu nin de la malbono. 14 Ĉar se
vi pardonas al homoj iliajn kulpojn, via Patro ĉiela
ankaŭ pardonos al vi. 15 Sed se vi ne pardonas al
homoj iliajn kulpojn, via Patro ankaŭ ne pardonos
viajn kulpojn. 16 Kaj kiam vi fastas, ne estu kiel la
hipokrituloj, kun malĝoja mieno; ĉar ili malbeligas
sian vizaĝon, por ke al homoj ili ŝajnu fasti. Vere mi
diras al vi: Ili jam ricevas sian rekompencon. 17 Sed
fastante, vi oleu vian kapon kaj lavu vian vizaĝon;
18 por ke vi ne al homoj ŝajnu fasti, sed al via Patro
en sekreto; kaj via Patro, kiu vidas en sekreto, vin
rekompencos. 19 Ne provizu al vi trezorojn sur la tero,
kie tineo kaj rusto konsumas, kaj kie ŝtelistoj trafosas
kaj ŝtelas; 20 sed provizu al vi trezorojn en la ĉielo, kie
nek tineo nek rusto konsumas, kaj kie ŝtelistoj nek
trafosas nek ŝtelas; 21 ĉar kie estas via trezoro, tie
estos ankaŭ via koro. 22 La lampo de la korpo estas la
okulo; se do via okulo estas sendifekta, via tuta korpo
estos luma. 23 Sed se via okulo estas malbona, via
tuta korpo estos malluma. Se do la lumo en vi estas
mallumo, kiel densa estas la mallumo! 24 Neniu povas
esti sklavo por du sinjoroj; ĉar aŭ li malamos unu kaj
amos la alian, aŭ li aliĝos al unu kaj malestimos la
alian. Vi ne povas servi al Dio kaj al Mamono! 25 Tial
mi diras al vi: Ne zorgu pri via vivo, kion vi manĝu,
aŭ kion vi trinku; nek pri via korpo, kion vi surmetu.
Ĉu la vivo ne estas pli ol nutraĵo, kaj la korpo pli ol
vestaĵo? 26 Rigardu la birdojn de la ĉielo, ke ili ne
semas, nek rikoltas, nek kolektas en grenejojn, kaj via
Patro ĉiela ilin nutras. Ĉu vi ne multe pli valoras ol ili?
27 Kaj kiu el vi per zorgado povas aldoni unu ulnon al
sia staturo? 28 Kaj kial vi zorgas pri vestaĵo? Pripensu
la liliojn de la kampo, kiel ili kreskas; ili ne laboras,
nek ŝpinas; 29 tamen mi diras al vi, ke eĉ Salomono en
sia tuta gloro ne estis ornamita, kiel unu el ĉi tiuj. 30
Sed se Dio tiel vestas la kampan herbaĵon, kiu ekzistas
hodiaŭ, kaj morgaŭ estos ĵetata en fornon, kiom pli
certe Li vestos vin, ho malgrandfiduloj? 31 Tial ne
zorgu, dirante: Kion ni manĝu? aŭ: Kion ni trinku? aŭ:
Kion ni surmetu? 32 Ĉar pri ĉio tio serĉas la nacianoj;
ĉar via Patro ĉiela scias, ke vi bezonas ĉion tion. 33
Sed celu unue Lian regnon kaj Lian justecon, kaj ĉio
tio estos aldonita al vi. 34 Tial ne zorgu pri la morgaŭa
tago, ĉar la morgaŭa tago zorgos pri si mem. Sufiĉa
por la tago estas ĝia propra malbono.

7 Ne juĝu, por ke vi ne estu juĝataj. 2 Ĉar per kia juĝo
vi juĝos, per tia vi estos juĝitaj; kaj per kia mezuro
vi mezuros, per tia oni mezuros al vi. 3 Kaj kial vi
rigardas la lignereton en la okulo de via frato, kaj ne
pripensas la trabon en via okulo? 4 Kiel vi diros al via
frato: Lasu min eltiri la lignereton el via okulo; kaj
jen la trabo en via propra okulo? 5 Hipokritulo, eligu
unue la trabon el via okulo, kaj tiam vi klare vidos, por

eltiri la lignereton el la okulo de via frato. 6 Ne donu
sanktaĵon al la hundoj, nek ĵetu viajn perlojn antaŭ
la porkoj; por ke ili ne premu ilin sub la piedoj, nek
poste, sin turninte, disŝiru vin. 7 Petu, kaj estos donite
al vi; serĉu, kaj vi trovos; frapu, kaj estos malfermite
al vi; 8 ĉar ĉiu petanto ricevas, kaj la serĉanto trovas,
kaj al la frapanto estos malfermite. 9 Plue, kiu homo
el vi, kies filo de li petos panon, donos al li ŝtonon; 10
aŭ se li petos fiŝon, donos al li serpenton? 11 Se do vi,
estante malbonaj, scias doni bonajn donacojn al viaj
filoj, kiom pli certe via Patro, kiu estas en la ĉielo,
donos bonaĵojn al tiuj, kiuj petas de Li? 12 Ĉion ajn
do, kion vi deziras, ke la homoj faru al vi, vi ankaŭ
faru al ili; ĉar ĉi tio estas la leĝo kaj la profetoj. 13
Eniru tra la mallarĝa pordo, ĉar larĝa estas la pordego
kaj vasta estas la vojo kondukanta al la pereo, kaj
multaj tra ĝi eniras. 14 Ĉar mallarĝa estas la pordo kaj
malvastigita estas la vojo kondukanta al la vivo, kaj
malmultaj ĝin trovas. 15 Gardu vin kontraŭ la falsaj
profetoj, kiuj venas al vi en ŝafaj feloj, sed interne
estas rabemaj lupoj. 16 Per iliaj fruktoj vi konos ilin.
Ĉu el dornarbetoj oni kolektas vinberojn, aŭ el kardoj
figojn? 17 Tiel ĉiu bona arbo donas bonajn fruktojn,
sed putra arbo donas malbonajn fruktojn. 18 Bona
arbo ne povas doni malbonajn fruktojn, nek putra
arbo doni bonajn fruktojn. 19 Ĉiu arbo, kiu ne donas
bonan frukton, estas dehakata kaj ĵetata en fajron.
20 Tial per iliaj fruktoj vi konos ilin. 21 Ne ĉiu, kiu
diras al mi: Sinjoro, Sinjoro, eniros en la regnon de la
ĉielo; sed tiu, kiu plenumas la volon de mia Patro,
kiu estas en la ĉielo. 22 Multaj diros al mi en tiu
tago: Sinjoro, Sinjoro, ĉu ni ne profetis en via nomo,
kaj en via nomo elpelis demonojn, kaj en via nomo
faris multajn potencaĵojn? 23 Kaj tiam mi konfesos
al ili: Mi neniam konis vin; foriĝu de mi, vi farantoj
de maljusteco. 24 Tial ĉiu, kiu aŭdas ĉi tiujn miajn
parolojn kaj plenumas ilin, estos komparata al saĝa
viro, kiu konstruis sian domon sur roko; 25 kaj falis
pluvo, kaj venis inundoj, kaj blovis ventoj, kaj albatis
tiun domon, kaj ĝi ne falis; ĉar ĝi estis fondita sur
roko. 26 Kaj ĉiu, kiu aŭdas ĉi tiujn miajn parolojn kaj
ne plenumas ilin, estos komparata al viro malsaĝa,
kiu konstruis sian domon sur la sablo; 27 kaj falis
pluvo, kaj venis inundoj, kaj blovis ventoj, kaj sin ĵetis
sur tiun domon, kaj ĝi falis; kaj granda estis ĝia falo.
28 Kaj kiam Jesuo finis tiujn parolojn, la homamasoj
miregis pri lia instruado; 29 ĉar li instruis ilin, kiel
havanta aŭtoritaton, kaj ne kiel iliaj skribistoj.

8 Kaj kiam li malsupreniris de la monto, lin sekvis
grandaj homamasoj. 2 Kaj jen venis al li leprulo
kaj adorkliniĝis al li, dirante: Sinjoro, se vi volas,
vi povas min purigi. 3 Kaj li etendis la manon kaj
tuŝis lin, dirante: Mi volas; estu purigita. Kaj tuj lia
lepro estis purigita. 4 Kaj Jesuo diris al li: Zorgu, ke
vi diru al neniu. Sed iru, montru vin al la pastro,
kaj oferu la donon, kiun Moseo ordonis, por atesto
al ili. 5 Kaj kiam li eniris en Kapernaumon, venis al
li centestro, petante lin, 6 kaj dirante: Sinjoro, mia
knabo kuŝas paralizulo en la domo, kaj terure suferas.
7 Kaj li diris al li: Mi venos, kaj sanigos lin. 8 Kaj la
centestro responde diris: Sinjoro, mi ne estas inda, ke
vi venu sub mian tegmenton; sed nur parolu vorte,
kaj mia knabo saniĝos. 9 Ĉar mi ankaŭ estas homo sub
aŭtoritato, havante soldatojn sub mi; kaj mi diras al ĉi
tiu: Iru; kaj li iras; kaj al alia: Venu; kaj li venas; kaj al
mia sklavo: Faru ĉi tion; kaj li ĝin faras. 10 Kaj kiam
Jesuo tion aŭdis, li miris, kaj diris al la sekvantoj: Vere
mi diras al vi, ke ĉe neniu en Izrael mi trovis tiom da
fido. 11 Kaj mi diras al vi, ke multaj venos el la oriento
kaj la okcidento, kaj sidiĝos kun Abraham kaj Isaak kaj
Jakob en la regno de la ĉielo; 12 sed la filoj de la regno
estos elĵetitaj en la eksteran mallumon; tie estos la
plorado kaj la grincado de dentoj. 13 Kaj Jesuo diris al
la centestro: Iru; kiel vi kredis, tiel estu farite al vi. Kaj
lia knabo saniĝis en tiu sama horo. 14 Kaj kiam Jesuo
venis en la domon de Petro, li vidis lian bopatrinon
kuŝanta, malsana de febro. 15 Kaj li tuŝis ŝian manon,
kaj la febro forlasis ŝin; kaj ŝi leviĝis kaj servis al
li. 16 Kaj kiam vesperiĝis, oni venigis al li multajn
demonhavantojn; kaj li elpelis la spiritojn per vorto,
kaj sanigis ĉiujn malsanulojn; 17 por ke plenumiĝu
tio, kio estis dirita per la profeto Jesaja, nome: Li mem
prenis niajn malfortaĵojn kaj portis niajn malsanojn.
18 Kaj kiam Jesuo vidis ĉirkaŭ si grandan homamason,
li ordonis transiri al la alia bordo. 19 Kaj venis unu
skribisto, kaj diris al li: Majstro, mi vin sekvos, kien
ajn vi iros. 20 Kaj Jesuo diris al li: La vulpoj havas
kavojn, kaj la birdoj de la ĉielo havas ripozejojn; sed
la Filo de homo ne havas, kie kuŝigi sian kapon. 21
Kaj alia el la disĉiploj diris al li: Sinjoro, permesu al
mi unue iri kaj enterigi mian patron. 22 Sed Jesuo
diris al li: Sekvu min, kaj lasu la mortintojn enterigi

siajn mortintojn. 23 Kaj kiam li eniris en ŝipeton, liaj
disĉiploj lin sekvis. 24 Kaj jen okazis granda malsereno
sur la maro, tiel ke la ŝipeto estis kovrita de la ondoj;
sed li dormadis. 25 Kaj ili venis, kaj vekis lin, dirante:
Sinjoro, savu; ni pereas. 26 Kaj li diris al ili: Kial vi
estas timemaj, ho malgrandfiduloj? Tiam li leviĝis, kaj
admonis la ventojn kaj la maron; kaj fariĝis granda
sereno. 27 Kaj la homoj miregis, dirante: Kia estas ĉi
tiu, ke eĉ la ventoj kaj la maro lin obeas? 28 Kaj kiam
li venis al la alia bordo, en la landon de la Gadaranoj,
lin renkontis du demonhavantoj, elvenante el inter la
tomboj, tre furiozaj, tiel, ke neniu povis preterpasi
per tiu vojo. 29 Kaj jen ili kriis, dirante: Kio estas
inter ni kaj vi, ho Filo de Dio? ĉu vi venis ĉi tien, por
turmenti nin antaŭ la tempo? 30 Kaj malproksime
de ili estis granda grego da porkoj, paŝtiĝantaj tie.
31 Kaj la demonoj petegis lin, dirante: Se vi elpelos
nin, forsendu nin en la gregon da porkoj. 32 Kaj li
diris al ili: Iru. Kaj elirinte, ili foriris en la porkojn; kaj
jen kuris la tuta grego malsupren de la krutaĵo en
la maron, kaj pereis en la akvoj. 33 Kaj la paŝtistoj
forkuris kaj iris en la urbon, kaj rakontis ĉion, kaj
pri la demonhavintoj. 34 Kaj jen la tuta urbo elvenis
renkonte al Jesuo; kaj vidinte lin, ili petegis, ke li
transiru el iliaj limoj.

9 Kaj enirinte en ŝipeton, li transiris, kaj venis en
sian propran urbon. 2 Kaj jen oni alportis al li
paralizulon, kuŝantan sur lito; kaj Jesuo, vidinte ilian
fidon, diris al la paralizulo: Kuraĝu, filo, viaj pekoj
estas pardonitaj. 3 Kaj jen iuj el la skribistoj diris en si:
Ĉi tiu blasfemas. 4 Kaj Jesuo, eksciante iliajn pensojn,
diris: Kial vi pensas malbonon en viaj koroj? 5 Ĉar kio
estas pli facila, diri: Viaj pekoj estas pardonitaj; aŭ
diri: Leviĝu kaj piediru? 6 Sed por ke vi sciu, ke la
Filo de homo havas aŭtoritaton sur la tero pardoni
pekojn — tiam li diris al la paralizulo: Leviĝu, prenu
vian liton, kaj iru al via domo. 7 Kaj li leviĝis, kaj iris
al sia domo. 8 Kaj vidinte tion, la homamasoj timis,
kaj gloris Dion, kiu donis tian aŭtoritaton al homoj.
9 Kaj Jesuo, forpasante de tie, vidis viron nomatan
Mateo, sidantan ĉe la impostejo; kaj li diris al li: Sekvu
min. Kaj li stariĝis, kaj sekvis lin. 10 Kaj dum li sidis ĉe
manĝo en la domo, jen multaj impostistoj kaj pekuloj
venis kaj sidiĝis tie kun Jesuo kaj liaj disĉiploj. 11
Kaj vidinte tion, la Fariseoj diris al liaj disĉiploj: Kial
via instruisto manĝas kun impostistoj kaj pekuloj?
12 Kaj aŭdinte tion, li diris: Ne la sanuloj bezonas
kuraciston, sed la malsanuloj. 13 Sed iru, kaj lernu,
kion signifas ĉi tio: Mi deziras bonfaradon, sed ne
oferon; ĉar mi venis, por alvoki ne justulojn, sed
pekulojn. 14 Tiam alvenis al li la disĉiploj de Johano,
dirante: Kial ni kaj la Fariseoj fastas ofte, sed viaj
disĉiploj ne fastas? 15 Kaj Jesuo diris al ili: Ĉu la filoj
de la edziĝejo povas malĝoji, dum la fianĉo estas
kun ili? Sed venos tagoj, kiam la fianĉo estos prenita
for de ili, kaj tiam ili fastos. 16 Kaj neniu alkudras
flikaĵon el nefulita drapo sur malnovan veston, ĉar
la plenigaĵo forprenas de la vesto, kaj pli malbona
ŝiraĵo fariĝas. 17 Ankaŭ oni ne enverŝas novan vinon
en malnovajn felsakojn; alie la felsakoj krevos, kaj
la vino elfluos, kaj la felsakoj detruiĝos; sed oni
enverŝas novan vinon en novajn felsakojn, kaj ambaŭ
konserviĝas. 18 Dum li tion parolis al ili, jen unu estro,
alveninte, adorkliniĝis al li, dirante: Mia filino ĵus
mortis; sed venu kaj metu vian manon sur ŝin, kaj ŝi
vivos. 19 Kaj Jesuo leviĝis, kaj sekvis lin, kaj ankaŭ liaj
disĉiploj. 20 Kaj jen virino, kiu jam dek du jarojn havis
sangofluon, venis malantaŭ lin kaj tuŝis la randon
de lia mantelo; 21 ĉar ŝi diris en si: Se mi nur tuŝos
lian mantelon, mi estos sanigita. 22 Kaj Jesuo, sin
turninte kaj vidinte ŝin, diris: Kuraĝu, filino; via fido
vin savis. Kaj en tiu sama horo la virino resaniĝis. 23
Kaj Jesuo, veninte en la domon de la estro kaj vidinte
la flutistojn kaj la homamason bruantajn, 24 diris:
Foriru; ĉar la knabineto ne mortis, sed dormas. Kaj ili
mokridis lin. 25 Sed kiam la homamaso estis elpelita,
li eniris, kaj prenis ŝian manon; kaj la knabineto
leviĝis. 26 Kaj disiris tiu famo en tiun tutan regionon.
27 Kaj kiam Jesuo foriris de tie, du blinduloj sekvis lin,
kriante kaj dirante: Kompatu nin, ho filo de David. 28
Kaj kiam li venis en la domon, la blinduloj alvenis
al li, kaj Jesuo diris al ili: Ĉu vi kredas, ke mi povas
fari ĉi tion? Ili diris al li: Jes, Sinjoro. 29 Tiam li tuŝis
iliajn okulojn, dirante: Estu al vi laŭ via fido. 30 Kaj
iliaj okuloj malfermiĝis. Kaj Jesuo severe ordonis al
ili: Gardu vin, ke neniu tion sciu. 31 Sed elirinte, ili
disvastigis lian famon en tiu tuta regiono. 32 Kaj dum
ili eliris, jen oni alportis al li mutan demonhavanton.
33 Kaj kiam la demono estis elpelita, la mutulo parolis;
kaj la homamasoj miris, dirante: Neniam tia afero
estas vidita en Izrael. 34 Sed la Fariseoj diris: Per la
estro de la demonoj li elpelas demonojn. 35 Kaj Jesuo
trairis ĉiujn urbojn kaj vilaĝojn, instruante en iliaj

sinagogoj, kaj predikante la evangelion de la regno,
kaj sanigante ĉian malsanon kaj ĉian malfortaĵon.
36 Kaj vidante la homamasojn, li estis kortuŝita pri
ili, ĉar ili estis mizerigitaj kaj disigitaj, kiel ŝafoj ne
havantaj paŝtiston. 37 Tiam li diris al siaj disĉiploj:
La rikolto ja estas abunda, sed la laborantoj estas
malmultaj. 38 Petu do la Sinjoron de la rikolto, ke Li
sendu laborantojn en Sian rikolton.

10 Kaj li alvokis al si la dek du disĉiplojn, kaj donis al
ili aŭtoritaton super malpuraj spiritoj, por elpeli
ilin, kaj por sanigi ĉian malsanon kaj ĉian malfortaĵon.
2 Kaj la nomoj de la dek du apostoloj estas jenaj: la
unua, Simon, kiu estis nomata Petro, kaj lia frato
Andreo, Jakobo, filo de Zebedeo, kaj lia frato Johano, 3
Filipo kaj Bartolomeo, Tomaso, kaj Mateo, impostisto,
Jakobo, filo de Alfeo, kaj Tadeo, 4 Simon, la Fervorulo,
kaj Judas Iskariota, kiu ankaŭ perfidis lin. 5 Ĉi tiujn
dek du Jesuo forsendis, kaj ordonis al ili, dirante: Ne
iru sur vojon de nacianoj, kaj ne eniru en urbon de
Samarianoj; 6 sed iru prefere al la perditaj ŝafoj de la
domo de Izrael. 7 Kaj dum vi iros, prediku, dirante: La
regno de la ĉielo alproksimiĝis. 8 Malsanulojn sanigu,
mortintojn levu, leprulojn purigu, demonojn elpelu:
donace vi ricevis, donace donu. 9 Ne provizu oron nek
arĝenton nek kupron en viajn zonojn, 10 nek saketon
por vojaĝo, nek du tunikojn, nek ŝuojn, nek bastonon;
ĉar la laboranto meritas sian nutraĵon. 11 Kaj en iu
ajn urbo aŭ vilaĝo, en kiun vi eniros, demandu, kiu tie
estas inda; kaj loĝu tie, ĝis vi foriros. 12 Kaj venante
en la domon, salutu ĝin. 13 Kaj se la domo estas inda,
via paco venu sur ĝin; sed se ĝi ne estas inda, via
paco revenu al vi. 14 Kaj se iu ne akceptos vin, nek
aŭskultos viajn vortojn, tiam forirante el tiu domo
aŭ tiu urbo, deskuu la polvon de viaj piedoj. 15 Vere
mi diras al vi: Pli elporteble estos por la lando de
Sodom kaj Gomora en la tago de juĝado, ol por tiu
urbo. 16 Jen mi forsendas vin kiel ŝafojn meze de
lupoj; estu do prudentaj kiel serpentoj, kaj simplaj
kiel kolomboj. 17 Sed gardu vin kontraŭ la homoj; ĉar
ili transdonos vin al sinedrioj, kaj en siaj sinagogoj ili
vin skurĝos; 18 kaj antaŭ provincestrojn kaj reĝojn
vi estos kondukitaj pro mi, por atesto al ili kaj al la
nacianoj. 19 Sed kiam ili transdonos vin, ne zorgu, kiel
aŭ kion vi parolos; ĉar estos donita al vi en tiu horo
tio, kion vi parolos. 20 Ĉar parolas ne vi, sed la Spirito
de via Patro parolas en vi. 21 Kaj frato transdonos
fraton al morto, kaj patro filon; kaj infanoj ribelos
kontraŭ gepatroj kaj mortigos ilin. 22 Kaj vi estos
malamataj de ĉiuj pro mia nomo; sed kiu persistos ĝis
la fino, tiu estos savita. 23 Kaj kiam oni vin persekutos
en unu urbo, forkuru en alian; ĉar vere mi diras al vi:
Vi ne trairos la urbojn de Izrael, antaŭ ol venos la Filo
de homo. 24 Disĉiplo ne estas super sia instruanto,
nek sklavo super sia sinjoro. 25 Sufiĉas por la disĉiplo,
ke li estu kiel lia instruanto, kaj la sklavo, kiel lia
sinjoro. Se oni nomis la dommastron Baal-Zebub,
kiom pli ankaŭ liajn domanojn! 26 Tial ne timu ilin,
ĉar nenio estas kovrita, kio ne estos elmontrita, kaj
nenio kaŝita, kio ne estos konigita. 27 Kion mi diras al
vi en la mallumo, tion parolu en la lumo; kaj kion vi
aŭdas en la orelon, tion proklamu sur la tegmentoj.
28 Kaj ne timu tiujn, kiuj mortigas la korpon, sed
ne povas mortigi la animon; sed prefere timu Tiun,
kiu povas pereigi kaj animon kaj korpon en Gehena.
(Geenna g1067) 29 Ĉu oni ne vendas du paserojn por
asaro? tamen unu el ili ne falos teren sen via Patro;
30 sed eĉ la haroj de via kapo estas ĉiuj kalkulitaj.
31 Tial ne timu; vi valoras pli, ol multaj paseroj. 32
Ĉiun do, kiu konfesos min antaŭ homoj, mi ankaŭ
konfesos antaŭ mia Patro, kiu estas en la ĉielo. 33
Sed kiu malkonfesos min antaŭ homoj, tiun mi ankaŭ
malkonfesos antaŭ mia Patro, kiu estas en la ĉielo. 34
Ne supozu, ke mi venis, por enkonduki pacon sur la
teron; mi venis, por enkonduki ne pacon, sed glavon.
35 Ĉar mi venis, por kontraŭmeti viron kontraŭ lian
patron, kaj filinon kontraŭ ŝian patrinon, kaj bofilinon
kontraŭ ŝian bopatrinon; 36 kaj la domanoj de homo
estos liaj malamikoj. 37 Kiu amas patron aŭ patrinon
pli ol min, tiu ne estas inda je mi; kaj kiu amas filon
aŭ filinon pli ol min, tiu ne estas inda je mi. 38 Kaj
kiu ne prenas sian krucon kaj sekvas post mi, tiu
ne estas inda je mi. 39 Kiu trovas sian vivon, tiu ĝin
perdos; kaj kiu perdas sian vivon pro mi, tiu ĝin
trovos. 40 Kiu vin akceptas, tiu min akceptas; kaj kiu
min akceptas, tiu akceptas Tiun, kiu min sendis. 41 Kiu
akceptas profeton en la nomo de profeto, tiu ricevos
rekompencon de profeto; kaj kiu akceptas justulon
en la nomo de justulo, tiu ricevos rekompencon de
justulo. 42 Kaj kiu trinkigos nur tason da malvarma
akvo al unu el ĉi tiuj malgranduloj en la nomo de
disĉiplo, vere mi diras al vi, tiu neniel perdos sian
rekompencon.

11 Kaj kiam Jesuo finis siajn ordonojn al siaj dek du
disĉiploj, li foriris de tie, por instrui kaj prediki
en iliaj urboj. 2 Kaj kiam Johano aŭdis en la malliberejo
pri la faroj de Kristo, li sendis per siaj disĉiploj, 3
por diri al li: Ĉu vi estas la venonto, aŭ ĉu ni atendu
alian? 4 Kaj Jesuo responde diris al ili: Iru kaj sciigu
al Johano tion, kion vi aŭdas kaj vidas: 5 blinduloj
ricevas vidpovon, kaj lamuloj marŝas, lepruloj estas
purigitaj, kaj surduloj aŭdas, kaj mortintoj leviĝas, kaj
al malriĉuloj evangelio estas predikata. 6 Kaj feliĉa
estas ĉiu, kiu ne falpuŝiĝas pro mi. 7 Kaj kiam ili
foriris, Jesuo komencis paroli al la homamasoj pri
Johano: Kion vi eliris en la dezerton por rigardi? ĉu
junkon skuatan de la vento? 8 Sed kion vi eliris por
vidi? ĉu homon mole vestitan? Jen tiuj, kiuj portas
molajn vestojn, troviĝas en domoj de reĝoj. 9 Sed
kion vi eliris por vidi? ĉu profeton? Jes, mi diras al
vi, kaj multe pli ol profeton. 10 Ĉar li estas tiu, pri
kiu estas skribite: Jen Mi sendos Mian anĝelon antaŭ
via vizaĝo, Kaj li preparos antaŭ vi vian vojon. 11
Vere mi diras al vi: Inter naskitoj de virinoj ne aperis
iu pli granda ol Johano, la Baptisto; tamen tiu, kiu
estas nur malgranda en la regno de la ĉielo, estas
pli granda ol li. 12 Kaj de post la tagoj de Johano, la
Baptisto, ĝis nun, la regno de la ĉielo estas perfortata,
kaj perfortuloj kaptas ĝin. 13 Ĉar ĉiuj profetoj kaj la
leĝo profetis ĝis Johano. 14 Kaj se vi volas tion ricevi,
tiu estas Elija, kiu estis venonta. 15 Kiu havas orelon
por aŭdi, tiu aŭdu. 16 Sed al kio mi komparu ĉi tiun
generacion? Ĝi similas al infanoj, kiuj sidas sur la
placoj, kaj vokas al la ceteraj, 17 dirante: Ni flutis al
vi, kaj vi ne dancis; ni lamentis, kaj vi ne ploris. 18
Ĉar venis Johano, nek manĝante nek trinkante, kaj ili
diras: Li havas demonon. 19 La Filo de homo venis,
manĝante kaj trinkante, kaj ili diras: Jen manĝegulo
kaj vindrinkulo, amiko de impostistoj kaj pekuloj!
Kaj la saĝeco estas pravigita de siaj faroj. 20 Tiam
li komenci riproĉi la urbojn, en kiuj estis faritaj la
plej multaj el liaj potencaj faroj; ĉar ili ne pentis.
21 Ve al vi, Ĥorazin! Ve al vi, Betsaida! Ĉar se en
Tiro kaj Cidon estus faritaj tiuj potencaĵoj, kiuj estas
faritaj en vi, antaŭ longe ili jam pentus en sakaĵo kaj
cindro. 22 Tamen mi diras al vi: Estos pli elporteble
por Tiro kaj Cidon en la tago de juĝado, ol por vi. 23
Kaj vi, Kapernaum! ĉu vi estos altigita ĝis la ĉielo?
vi malsupreniĝos ĝis Hades; ĉar se en Sodom estus
faritaj tiuj potencaĵoj, kiuj estas faritaj en vi, ĝi restus
ĝis hodiaŭ. **(Hadēs g86)** 24 Tamen mi diras al vi: Estos
pli elporteble por la lando de Sodom en la tago de
juĝado, ol por vi. 25 En tiu tempo Jesuo ekparolis kaj
diris: Mi Vin gloras, ho Patro, Sinjoro de la ĉielo kaj la
tero, ke tion Vi kaŝis for de saĝuloj kaj prudentuloj,
kaj malkaŝis al infanoj; 26 jes, Patro, ĉar tiel estis bone
antaŭ Vi. 27 Ĉio estas transdonita al mi de mia Patro,
kaj neniu konas la Filon krom la Patro, nek iu konas
la Patron krom la Filo, kaj tiu, al kiu la Filo volas
malkaŝi Lin. 28 Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj
kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos. 29 Metu sur vin
mian jugon, kaj lernu ĉe mi, ĉar mi estas milda kaj
korhumila; kaj vi trovos ripozon por viaj animoj. 30
Ĉar mia jugo estas facila, kaj mia ŝarĝo estas malpeza.

12 En tiu tempo Jesuo iris en sabato tra la
grenkampoj, kaj liaj disĉiploj malsatis, kaj
komencis deŝiri spikojn, kaj manĝi. 2 Sed la Fariseoj,
vidinte, diris al li: Jen viaj disĉiploj faras tion, kio
ne estas permesata en sabato. 3 Sed li diris al ili: Ĉu
vi ne legis, kion faris David, kiam malsatis li kaj liaj
kunuloj? 4 ke li eniris en la domon de Dio, kaj manĝis
la panojn de propono, kiujn manĝi ne estis permesate
al li, nek al liaj kunuloj, sed nur al la pastroj? 5 Kaj
ĉu vi ne legis en la leĝo, kiel en sabato la pastroj en
la templo profanas la sabaton kaj estas senkulpaj? 6
Sed mi diras al vi, ke alestas ĉi tie io pli granda ol la
templo. 7 Sed se vi komprenus, kion signifas ĉi tio: Mi
deziras bonfaradon, sed ne oferon; vi ne kondamnus
la senkulpajn. 8 Ĉar la Filo de homo estas sinjoro de
la sabato. 9 Kaj li foriris de tie, kaj eniris en ilian
sinagogon; 10 kaj jen viro, havanta manon velkintan.
Kaj oni demandis al li, dirante: Ĉu estas permesate
sanigi en sabato? por ke ili povu lin akuzi. 11 Kaj li
diris al ili: Kiu el vi, havanta unu ŝafon, se ĝi falos en
fosaĵon en sabato, ne ekprenos kaj levos ĝin? 12 Kiom
do viro superas ŝafon! Tial estas permesate bonfari en
sabato. 13 Tiam li diris al la viro: Etendu vian manon.
Kaj ĉi tiu etendis ĝin, kaj ĝi tute resaniĝis kiel la
alia. 14 Sed la Fariseoj eliris, kaj konsiliĝis kontraŭ li,
kiamaniere lin pereigi. 15 Kaj Jesuo, eksciante, foriris
de tie, kaj multaj lin sekvis; kaj li sanigis ilin ĉiujn,
16 kaj admonis ilin, ke ili ne konatigu lin; 17 por ke
plenumiĝu tio, kio estis dirita per la profeto Jesaja,
nome: 18 Jen estas Mia servanto, kiun Mi elektis, Mia
amata, en kiu Mia animo havas plezuron. Mi metos
Mian Spiriton sur lin; Kaj li proklamos justecon al

la nacioj. 19 Li ne disputados, nek laŭte krios; Kaj
oni ne aŭdos sur la stratoj lian voĉon. 20 Kanon
rompetitan li ne rompos, Kaj meĉon senfajriĝantan li
ne estingos, Ĝis li elsendos juĝon por venko. 21 Kaj al
lia nomo esperos la nacioj. 22 Tiam oni kondukis al
li demonhavanton, blindan kaj mutan; kaj li sanigis
lin, tiel ke la mutulo parolis kaj vidis. 23 Kaj miris
ĉiuj homamasoj, kaj diris: Ĉu ĉi tiu estas la filo de
David? 24 Sed la Fariseoj, aŭdinte, diris: Ĉi tiu ne
elpelas demonojn krom per Baal-Zebub, estro de la
demonoj. 25 Kaj sciante iliajn pensojn, li diris al ili:
Ĉiu regno dividita kontraŭ si dezertiĝas, kaj ĉiu urbo
aŭ domo dividita kontraŭ si ne starados; 26 kaj se
Satano elpelas Satanon, li estas dividita kontraŭ si;
kiel do staros lia regno? 27 Kaj se mi per Baal-Zebub
elpelas demonojn, per kiu viaj filoj elpelas ilin? tial ili
estos viaj juĝantoj. 28 Sed se mi per la Spirito de Dio
elpelas demonojn, tiam la regno de Dio estas veninta
sur vin. 29 Kaj kiel oni povas eniri en la domon de
la fortulo kaj trarabi liajn posedaĵojn, se unue li ne
ligos la fortulon? kaj poste li trarabos lian domon. 30
Kiu ne estas kun mi, tiu estas kontraŭ mi; kaj kiu ne
kolektas kun mi, tiu disĵetas. 31 Tial mi diras al vi: Ĉia
peko kaj ĉia blasfemo estos pardonita el homoj; sed la
blasfemo kontraŭ la Spirito ne estos pardonita. 32
Kaj al iu, kiu parolos vorton kontraŭ la Filo de homo,
tio estos pardonita; sed al iu, kiu parolos kontraŭ
la Sankta Spirito, tio ne estos pardonita en ĉi tiu
mondo, nek en la venonta. (aiōn g165) 33 Aŭ faru la
arbon bona kaj ĝian frukton bona, aŭ faru la arbon
malbona kaj ĝian frukton malbona; ĉar la arbo estas
konata per la frukto. 34 Ho vipuridoj! kiel vi povas
paroli bonaĵojn, estante malbonaj? ĉar el la abundo de
la koro la buŝo parolas. 35 La bona homo el sia bona
trezoro elmetas bonaĵojn; kaj la malbona homo el sia
malbona trezoro elmetas malbonaĵojn. 36 Kaj mi diras
al vi, ke pro ĉiu senutila vorto, kiun homoj parolos, ili
donos respondon en la tago de juĝado. 37 Ĉar laŭ viaj
vortoj vi estos pravigitaj, kaj laŭ viaj vortoj vi estos
kondamnitaj. 38 Tiam iuj el la skribistoj kaj Fariseoj
respondis al li, dirante: Majstro, ni deziras vidi signon
de vi. 39 Sed li respondis kaj diris al ili: Malbona kaj
adultema generacio serĉas signon; kaj neniu signo
estos donita al ĝi krom la signo de la profeto Jona;
40 ĉar kiel Jona estis tri tagojn kaj tri noktojn en la
ventro de la marmonstro, tiel la Filo de homo estos
tri tagojn kaj tri noktojn en la koro de la tero. 41 Viroj
Nineveanoj staros en la juĝado kun ĉi tiu generacio,
kaj kondamnos ĝin; ĉar ili pentis pro la predikado
de Jona; kaj jen iu pli granda ol Jona estas ĉi tie. 42
La reĝino de la sudo leviĝos en la juĝado kun ĉi tiu
generacio, kaj kondamnos ĝin; ĉar ŝi venis el la finoj
de la tero, por aŭskulti la saĝon de Salomono; kaj jen
iu pli granda ol Salomono estas ĉi tie. 43 Sed kiam la
malpura spirito eliras el homo, ĝi trairas tra senakvaj
lokoj, serĉante ripozon, sed ne trovas ĝin. 44 Tiam
ĝi diras: Mi reiros al mia domo, el kie mi eliris. Kaj
alveninte, ĝi trovas ĝin vakanta, balaita, kaj ornamita.
45 Tiam ĝi iras, kaj kunprenas al si sep aliajn spiritojn
pli malbonajn ol ĝi mem, kaj ili eniras kaj loĝas tie;
kaj la fina stato de tiu homo fariĝas pli malbona, ol la
unua. Tiel estos ankaŭ al ĉi tiu malbona generacio.
46 Dum li ankoraŭ parolis al la homamasoj, jen lia
patrino kaj liaj fratoj staris ekstere, dezirantaj paroli
kun li. 47 Kaj iu diris al li: Jen via patrino kaj viaj
fratoj staras ekstere, dezirantaj paroli kun vi. 48 Sed li
responde diris al tiu, kiu parolis al li: Kiu estas mia
patrino? kaj kiuj estas miaj fratoj? 49 Kaj etendinte la
manon al siaj disĉiploj, li diris: Jen mia patrino kaj
miaj fratoj! 50 Ĉar kiu ajn faros la volon de mia Patro,
kiu estas en la ĉielo, tiu estas mia frato kaj mia fratino
kaj mia patrino.

**13** En tiu tago Jesuo eliris el la domo kaj sidiĝis
apud la maro. 2 Kaj kolektiĝis al li grandaj
homamasoj, tiel ke li eniris en ŝipeton, kaj sidis; kaj la
tuta homamaso staris sur la marbordo. 3 Kaj li multe
parolis al ili per paraboloj, dirante: Jen semisto eliris,
por semi; 4 kaj dum li semis, iuj semoj falis apud la
vojo, kaj la birdoj venis kaj formanĝis ilin; 5 kaj aliaj
falis sur ŝtonajn lokojn, kie ili ne havis multe da tero;
kaj tuj ili ekkreskis, ĉar ili ne havis profundecon de
tero; 6 kaj kiam la suno leviĝis, ili brulsekiĝis, kaj
ĉar ili ne havis radikon, ili forvelkis. 7 Kaj aliaj falis
inter dornojn, kaj la dornoj kreskis kaj sufokis ilin; 8
kaj aliaj falis sur la bonan teron, kaj donis frukton,
jen centoble, jen sesdekoble, jen tridekoble. 9 Kiu
havas orelojn, tiu aŭdu. 10 Kaj la disĉiploj venis, kaj
diris al li: Kial vi parolas al ili per paraboloj? 11 Kaj
li respondis kaj diris al ili: Al vi estas donite scii la
misterojn de la regno de la ĉielo, sed al ili ne estas
donite. 12 Ĉar kiu ajn havas, al tiu estos donite, kaj
li havos abundon; sed kiu ajn ne havas, for de tiu
estos prenita eĉ tio, kion li havas. 13 Tial mi parolas

al ili per paraboloj; ĉar vidante, ili ne rimarkas, kaj
aŭdante, ili ne aŭdas nek komprenas. **14** Kaj por ili
plenumiĝis tiu profetaĵo de Jesaja, kiu diras: Aŭdante,
vi aŭdos, sed ne komprenos; Kaj vidante, vi vidos, sed
ne rimarkos; **15** Ĉar la koro de tiu popolo grasiĝis,
Kaj iliaj oreloj aŭdas malklare, Kaj siajn okulojn ili
fermis; Por ke ili ne vidu per siaj okuloj, Kaj ne aŭdu
per siaj oreloj, Kaj ne komprenu per sia koro, Kaj ne
rekonvertiĝu, Kaj ke Mi ne sanigu ilin. **16** Sed feliĉaj
estas viaj okuloj, ĉar ili vidas; kaj viaj oreloj, ĉar ili
aŭdas. **17** Vere mi diras al vi, ke multaj profetoj kaj
justuloj deziris vidi tion, kion vi vidas, sed ili ne vidis;
kaj aŭdi tion, kion vi aŭdas, sed ili ne aŭdis. **18** Vi do
aŭdu la parabolon de la semisto. **19** Kiam iu aŭdas la
vorton de la regno kaj ne komprenas ĝin, tiam venas
la malbonulo, kaj forprenas tion, kio estas semita
en lia koro. Ĉi tiu estas la ricevinta semon apud la
vojo. **20** Kaj tiu, kiu ricevis semon sur la ŝtonaj lokoj,
estas tiu, kiu aŭdas la vorton kaj tuj kun ĝojo akceptas
ĝin; **21** sed li ne havas radikon en si, sed restas nur
portempe, kaj kiam venas sufero aŭ persekuto pro
la vorto, tuj li falpuŝiĝas. **22** Kaj kiu ricevis semon
inter la dornoj, estas tiu, kiu aŭdas la vorton; sed la
zorgoj de la mondo kaj la trompo de riĉo sufokas la
vorton, kaj li fariĝas senfrukta. **(aiōn g165)** **23** Kaj kiu
ricevis semon sur la bona tero, estas tiu, kiu aŭdas la
vorton kaj komprenas ĝin; kaj tiu ja portas frukton,
kaj donas, jen centoble, jen sesdekoble, jen tridekoble.
**24** Alian parabolon li proponis al ili, dirante: La regno
de la ĉielo similas al homo, kiu semis bonan semon en
sia kampo; **25** sed dum homoj dormis, lia malamiko
venis kaj semis lolon meze de la tritiko, kaj foriris. **26**
Kaj kiam la trunketo kreskis kaj donis frukton, tiam
aperis ankaŭ la lolo. **27** Kaj la sklavoj de la dommastro
venis, kaj diris al li: Sinjoro, ĉu vi ne semis bonan
semon en via kampo? De kie do ĝi havas lolon? **28** Kaj
li diris al ili: Iu malamiko faris tion. Kaj la sklavoj diris
al li: Ĉu vi do volas, ke ni iru kaj kolektu ĝin? **29** Sed li
diris: Ne; por ke, kolektante la lolon, vi ne elradikigu
ankaŭ la tritikon. **30** Lasu al ambaŭ kreski kune ĝis
la rikolto; kaj en la tempo de la rikolto mi diros al
la rikoltistoj: Kolektu unue la lolon, kaj ligu ĝin en
faskojn, por bruligi ĝin; sed kolektu la tritikon en
mian grenejon. **31** Alian parabolon li proponis al ili,
dirante: La regno de la ĉielo similas al sinapa semeto,
kiun viro prenis kaj semis en sia kampo; **32** ĝi vere
estas pli malgranda ol ĉiuj semoj, sed kreskinte, ĝi
estas pli granda ol la legomoj, kaj fariĝas arbo, tiel ke
venas la birdoj de la ĉielo kaj loĝas en ĝiaj branĉoj. **33**
Alian parabolon li parolis al ili: La regno de la ĉielo
similas al fermentaĵo, kiun virino prenis kaj kaŝis
en tri mezurojn da faruno, ĝis la tuto fermentis. **34**
Ĉion tion parolis Jesuo per paraboloj al la homamasoj,
kaj sen parabolo li parolis nenion al ili; **35** por ke
plenumiĝu tio, kio estis dirita per la profeto, nome:
Mi malfermos per sentenco mian buŝon; Mi eldiros
enigmojn el tempo antikva. **36** Tiam forsendinte la
homamasojn, li venis en la domon; kaj liaj disĉiploj
venis al li, dirante: Klarigu al ni la parabolon pri la lolo
de la kampo. **37** Kaj responde li diris: Tiu, kiu semas la
bonan semon, estas la Filo de homo; **38** kaj la kampo
estas la mondo; kaj la bonaj semoj estas la filoj de la
regno; kaj la lolo estas la filoj de la malbonulo; **39** kaj la
malamiko, kiu ilin semis, estas la diablo; kaj la rikolto
estas la fino de la mondaĝo; kaj la rikoltistoj estas
anĝeloj. **(aiōn g165)** **40** Kiel do la lolo estas kolektita kaj
bruligita per fajro, tiel estos ĉe la fino de la mondaĝo.
**(aiōn g165)** **41** La Filo de homo elsendos siajn anĝelojn,
kaj ili kolektos el lia regno ĉiun falpuŝilon, kaj ĉiujn,
kiuj faras maljustecon, **42** kaj ĵetos ilin en la fornon de
fajro; tie estos la plorado kaj la grincado de dentoj. **43**
Tiam la justuloj brilos kiel la suno en la regno de sia
Patro. Kiu havas orelojn, tiu aŭdu. **44** La regno de la
ĉielo similas al kaŝita en kampo trezoro, kiun viro
trovis kaj kaŝis, kaj pro ĝojo li iras kaj vendas ĉion,
kion li posedas, kaj aĉetas tiun kampon. **45** Cetere, la
regno de la ĉielo similas al komercisto, serĉanta belajn
perlojn; **46** kaj trovinte unu multevaloran perlon, li iris
kaj vendis ĉion, kion li posedis, kaj aĉetis ĝin. **47** Plue,
la regno de la ĉielo similas al reto, kiu estis ĵetita en
la maron kaj kolektis el ĉiu speco, **48** kaj kiun, kiam ĝi
pleniĝis, oni suprentiris al la marbordo; kaj sidiĝinte,
ili kolektis la bonajn en ujojn, sed la malbonajn ili
ĵetis eksteren. **49** Tiel estos en la fino de la mondaĝo:
la anĝeloj eliros, kaj apartigos la malbonulojn el inter
la justuloj, **(aiōn g165)** **50** kaj ĵetos ilin en la fornon de
fajro; tie estos la plorado kaj la grincado de dentoj.
**51** Ĉu vi komprenis ĉion tion? Ili diris al li: Jes. **52**
Kaj li diris al ili: Tial ĉiu skribisto, disĉipligita en la
regnon de la ĉielo, similas al dommastro, kiu elportas
el sia trezorejo objektojn novajn kaj malnovajn. **53** Kaj
kiam Jesuo finis tiujn parabolojn, li foriris de tie. **54**
Kaj veninte en sian patrujon, li instruis ilin en ilia
sinagogo, tiel ke ili miris, kaj diris: De kie ĉi tiu viro

havas tian saĝecon kaj la potencaĵojn? 55 Ĉu ĉi tiu
ne estas la filo de la ĉarpentisto? ĉu lia patrino ne
estas nomata Maria? kaj liaj fratoj Jakobo kaj Joses kaj
Simon kaj Judas? 56 Kaj ĉu liaj fratinoj ne estas ĉiuj ĉe
ni? De kie do li ĉion tion havas? 57 Kaj ili ofendiĝis pro
li. Sed Jesuo diris al ili: Profeto ne estas sen honoro,
krom en sia patrujo kaj en sia domo. 58 Kaj pro ilia
nekredemo li faris tie ne multajn potencaĵojn.

**14** En tiu tempo la tetrarĥo Herodo aŭdis la famon
pri Jesuo, 2 kaj diris al siaj servantoj: Tiu estas
Johano, la Baptisto; li leviĝis el la mortintoj, kaj tial
tiuj potencaĵoj energias en li. 3 Ĉar Herodo jam arestis
Johanon kaj ligis lin kaj metis lin en malliberejon
pro Herodias, kiu estis edzino de lia frato Filipo. 4
Ĉar Johano diris al li: Ne decas, ke vi havu ŝin. 5
Kaj dezirante mortigi lin, li timis la popolon, ĉar oni
opiniis lin profeto. 6 Sed kiam venis la naskotaga festo
de Herodo, la filino de Herodias dancis en la mezo, kaj
plaĉis al Herodo. 7 Tiam li ĵure promesis doni al ŝi ion
ajn, kion ŝi petos. 8 Kaj ŝi, instigite de sia patrino,
diris: Donu al mi ĉi tie sur plado la kapon de Johano,
la Baptisto. 9 Kaj la reĝo malĝojis; tamen pro siaj ĵuroj
kaj pro la kunmanĝantoj li ordonis doni ĝin; 10 kaj
sendinte, li senkapigis Johanon en la malliberejo. 11
Kaj oni alportis lian kapon sur plado, kaj donis ĝin al
la knabino, kaj ŝi alportis ĝin al sia patrino. 12 Kaj liaj
disĉiploj venis kaj forportis la korpon kaj enterigis
ĝin, kaj ili iris kaj rakontis tion al Jesuo. 13 Kaj Jesuo,
aŭdinte, foriris de tie en ŝipeto al dezerta loko aparte;
kaj la homamasoj, aŭdinte, sekvis lin, piedirante el la
urboj. 14 Kaj li elvenis, kaj vidis grandan homamason,
kaj li kortuŝiĝis pri ili, kaj sanigis iliajn malsanulojn.
15 Kaj kiam venis la vespero, liaj disĉiploj venis al li,
dirante: La loko estas dezerta, kaj la horo jam pasis;
forsendu la homamason, por ke ili iru en la vilaĝojn
kaj aĉetu por si manĝaĵon. 16 Sed Jesuo diris al ili:
Ili ne bezonas foriri; vi donu al ili manĝi. 17 Kaj ili
diris al li: Ni nenion havas ĉi tie, krom kvin panoj
kaj du fiŝoj. 18 Kaj li diris: Alportu ilin ĉi tien al
mi. 19 Kaj li ordonis al la homamasoj sidiĝi sur la
herbo; kaj li prenis la kvin panojn kaj la du fiŝojn,
kaj suprenrigardinte al la ĉielo, li benis kaj dispecigis
la panojn, kaj donis al la disĉiploj, kaj la disĉiploj al
la homamasoj. 20 Kaj ĉiuj manĝis kaj satiĝis; kaj oni
kolektis da postrestintaj fragmentoj dek du plenajn
korbojn. 21 Kaj la manĝantoj estis ĉirkaŭ kvin mil
viroj, krom virinoj kaj infanoj. 22 Kaj tuj li devigis
la disĉiplojn eniri en la ŝipeton kaj iri antaŭ li al
la alia bordo, ĝis li forsendos la homamason. 23
Kaj forsendinte la homamason, li supreniris sur la
monton sola, por preĝi; kaj kiam vesperiĝis, li estis
tie sola. 24 Sed la ŝipeto jam estis meze de la maro,
turmentata de la ondoj; ĉar la vento estis kontraŭa.
25 Kaj en la kvara gardoparto de la nokto li venis al
ili, irante sur la maro. 26 Sed la disĉiploj, vidante
lin iranta sur la maro, maltrankviliĝis, dirante: Jen
fantomo; kaj ili ekkriis pro timo. 27 Sed tuj Jesuo
parolis al ili, dirante: Kuraĝu; ĝi estas mi; ne timu. 28
Kaj responde al li Petro diris: Sinjoro, se ĝi estas vi,
ordonu min veni al vi sur la akvo. 29 Kaj li diris: Venu.
Kaj Petro, malsuprenirinte el la ŝipeto, iris sur la akvo,
por veni al Jesuo. 30 Sed vidante la venton, li timis,
kaj komencante subakviĝi, li ekkriis, dirante: Sinjoro,
savu min. 31 Kaj tuj Jesuo etendis la manon kaj ektenis
lin, dirante al li: Ho malgrandfidulo, kial vi dubis? 32
Kaj kiam ili supreniris en la ŝipeton, la vento ĉesiĝis.
33 Kaj tiuj, kiuj estis en la ŝipeto, adorkliniĝis al li,
dirante: Vere vi estas Filo de Dio. 34 Kaj transirinte, ili
alvenis teren ĉe Genesaret. 35 Kaj kiam la viroj de tiu
loko ekkonis lin, ili sendis en la tutan ĉirkaŭaĵon, kaj
venigis al li ĉiujn malsanulojn; 36 kaj ili petis lin, ke ili
nur tuŝu la randon de lia mantelo; kaj ĉiuj, kiuj tuŝis,
estis tute resanigitaj.

**15** Tiam alvenis al Jesuo el Jerusalem Fariseoj kaj
skribistoj, dirante: 2 Kial viaj disĉiploj transpaŝas
la tradicion de la antaŭuloj? ĉar ili ne lavas siajn
manojn, kiam ili manĝas panon. 3 Kaj li responde diris
al ili: Kial vi ankaŭ transpaŝas la ordonon de Dio per
via tradicio? 4 Ĉar Dio diris: Respektu vian patron kaj
vian patrinon; kaj: Kiu malbenas sian patron aŭ sian
patrinon, tiu nepre mortu. 5 Sed vi diras: Se iu diros al
sia patro aŭ al sia patrino: Oferdono estu tio, per kio vi
povus profiti de mi, 6 tiu ne devas respekti sian patron
aŭ sian patrinon. Kaj vi vantigis la vorton de Dio per
via tradicio. 7 Ho hipokrituloj, bone profetis Jesaja pri
vi, dirante: 8 Ĉi tiu popolo honoras Min per siaj lipoj,
Sed ilia koro estas malproksime de Mi. 9 Sed vane ili
Min adoras, Instruante kiel doktrinojn ordonojn de
homoj. 10 Kaj alvokinte al si la homamason, li diris al
ili: Aŭskultu kaj komprenu: 11 Ne tio, kio eniras en la
buŝon, profanas la homon; sed kio eliras el la buŝo, tio
profanas la homon. 12 Tiam veninte, la disĉiploj diris

al li: Ĉu vi scias, ke la Fariseoj ofendiĝis, kiam ili aŭdis
tiun diron? 13 Sed li responde diris: Ĉiu kreskaĵo,
kiun mia ĉiela Patro ne plantis, estos elradikigita. 14
Lasu ilin; ili estas blindaj kondukantoj de blinduloj.
Kaj se blindulo kondukos blindulon, ambaŭ falos en
fosaĵon. 15 Kaj Petro responde diris al li: Klarigu al ni
tiun parabolon. 16 Kaj li diris: Ĉu vi ankaŭ estas eĉ
ankoraŭ sen kompreno? 17 Ĉu vi ne konscias, ke ĉio,
eniranta en la buŝon, pasas en la ventron kaj estas
elĵetata en apartan lokon? 18 Sed tio, kio eliras el
la buŝo, elvenas el la koro, kaj profanas la homon.
19 Ĉar el la koro eliras malvirtaj pensoj, mortigoj,
adultoj, malĉastaĵoj, ŝteloj, falsatestoj, blasfemoj: 20
jen tio, kio profanas la homon, sed manĝi kun manoj
nelavitaj ne profanas la homon. 21 Kaj elirinte de
tie, Jesuo foriris en la regionojn apud Tiro kaj Cidon.
22 Kaj jen virino Kanaana, veninte el tiuj limlandoj,
kriis, dirante: Ho Sinjoro, filo de David, kompatu min;
mia filino estas terure turmentata de demono. 23
Sed li ne respondis al ŝi eĉ unu vorton. Kaj alveninte,
liaj disĉiploj petis lin, dirante: Forsendu ŝin, ĉar ŝi
krias post ni. 24 Kaj li responde diris: Mi ne estas
sendita, krom al la perditaj ŝafoj el la domo de Izrael.
25 Sed ŝi venis kaj adorkliniĝis al li, dirante: Sinjoro,
helpu min. 26 Sed li responde diris: Ne decas preni
la panon de la infanoj kaj ĵeti ĝin al la hundetoj. 27
Sed ŝi diris: Jes, Sinjoro; ĉar eĉ la hundetoj manĝas el
la panpecetoj, kiuj falas de la tablo de iliaj sinjoroj.
28 Tiam responde Jesuo diris al ŝi: Ho virino, granda
estas via fido; estu al vi, kiel vi volas. Kaj ŝia filino
estis sanigita de post tiu horo. 29 Kaj transirinte de tie,
Jesuo venis apud la maron de Galileo; kaj suprenirinte
sur la monton, li sidiĝis tie. 30 Kaj alvenis al li grandaj
homamasoj, havante kun si homojn lamajn, blindajn,
mutajn, kriplajn, kun multaj aliaj, kaj metis ilin apud
liajn piedojn; kaj li sanigis ilin; 31 tiel ke la homamaso
miris, vidante mutulojn parolantaj, kriplulojn sanaj,
kaj lamulojn piedirantaj, kaj blindulojn vidantaj; kaj
ili gloris la Dion de Izrael. 32 Kaj Jesuo, alvokinte al si
siajn disĉiplojn, diris: Mi kortuŝiĝas pro la homamaso,
ĉar jam tri tagojn ili restas ĉe mi, kaj nenion havas
manĝi; kaj mi ne volas forsendi ilin fastantaj, por ke
ili ne laciĝu sur la vojo. 33 Kaj la disĉiploj diris al li:
De kie ni povas ricevi en la dezerto tiom da panoj,
por satigi tiom da homoj? 34 Kaj Jesuo diris al ili:
Kiom da panoj vi havas? Kaj ili diris: Sep, kaj kelkajn
malgrandajn fiŝojn. 35 Kaj li ordonis al la homamaso
sidiĝi sur la tero; 36 kaj li prenis la sep panojn kaj la
fiŝojn; kaj doninte dankon, li dispecigis ilin, kaj donis
al la disĉiploj, kaj la disĉiploj al la homamasoj. 37 Kaj
ĉiuj manĝis kaj satiĝis; kaj oni kolektis da postrestintaj
fragmentoj sep korbegojn plenajn. 38 Kaj la manĝantoj
estis kvar mil viroj, krom virinoj kaj infanoj. 39 Kaj
forsendinte la homamasojn, li eniris en la ŝipeton, kaj
venis en la regionojn de Magadan.

16 Kaj alvenis la Fariseoj kaj la Sadukeoj, kaj por
provi lin postulis, ke li montru al ili signon el la
ĉielo. 2 Kaj responde li diris al ili: Kiam vesperiĝas, vi
diras: Estos bona vetero, ĉar la ĉielo ruĝiĝas; 3 kaj
frumatene: Estos hodiaŭ malbona vetero, ĉar la ĉielo
ruĝiĝas kolere. La vizaĝon de la ĉielo vi povas juĝi,
sed la signojn de la tempo vi ne povas. 4 Generacio
malbona kaj adultema serĉas signon; kaj signo ne
estos donita al ĝi, krom la signo de Jona. Kaj lasinte
ilin, li foriris. 5 Kaj la disĉiploj, transirinte al la alia
bordo, forgesis preni panojn. 6 Sed Jesuo diris al
ili: Zorgu, kaj gardu vin kontraŭ la fermentaĵo de la
Fariseoj kaj Sadukeoj. 7 Kaj ili diskutis inter si, dirante:
Ĉar ni ne prenis panojn. 8 Sed Jesuo, eksciante tion,
diris: Kial vi diskutas inter vi, ho malgrandfiduloj,
pro tio, ke vi ne prenis panojn? 9 Ĉu vi ankoraŭ ne
konscias, nek memoras la kvin panojn de la kvin mil,
kaj kiom da korboj vi kolektis? 10 Nek la sep panojn de
la kvar mil, kaj kiom da korbegoj vi kolektis? 11 Kial vi
ne komprenas, ke ne pri panoj mi diris al vi: Gardu
vin kontraŭ la fermentaĵo de la Fariseoj kaj Sadukeoj?
12 Tiam ili ekkomprenis, ke li admonis ilin sin gardi
ne kontraŭ la fermentaĵo de panoj, sed kontraŭ la
instruado de la Fariseoj kaj Sadukeoj. 13 Kaj Jesuo,
veninte en la regionojn de Cezarea Filipi, demandis
siajn disĉiplojn, dirante: Kiu, diras la homoj, ke mi, la
Filo de homo, estas? 14 Kaj ili diris: Laŭ iuj: Johano, la
Baptisto; laŭ aliaj: Elija; kaj laŭ aliaj: Jeremia, aŭ unu
el la profetoj. 15 Li diris al ili: Sed vi, kiu vi diras, ke mi
estas? 16 Kaj responde Simon Petro diris: Vi estas la
Kristo, la Filo de la vivanta Dio. 17 Kaj Jesuo responde
diris al li: Feliĉa vi estas, Simon Bar-Jona; ĉar ne karno
kaj sango tion malkaŝis al vi, sed mia Patro, kiu estas
en la ĉielo. 18 Kaj mi diras al vi, ke vi estas Petro,
kaj sur ĉi tiu roko mi konstruos mian eklezion; kaj
pordegoj de Hades ne superfortos ĝin. (Hadēs g86) 19 Mi
donos al vi la ŝlosilojn de la regno de la ĉielo; kaj kion
ajn vi ligos sur la tero, tio estos ligita en la ĉielo; kaj

kion ajn vi malligos sur la tero, tio estos malligita en
la ĉielo. 20 Tiam li admonis la disĉiplojn, ke ili diru
al neniu, ke li estas la Kristo. 21 De post tiu tempo
Jesuo komencis montri al siaj disĉiploj, ke li devas
iri al Jerusalem, kaj multe suferi ĉe la pliaĝuloj kaj
ĉefpastroj kaj skribistoj, kaj esti mortigita, kaj la trian
tagon releviĝi. 22 Kaj Petro prenis lin, kaj komencis
admoni lin, dirante: Kompaton al vi, Sinjoro! tio ne
estu al vi! 23 Sed turninte sin, li diris al Petro: Iru
malantaŭ min, Satano; vi estas faligilo por mi, ĉar
vi havas pensojn ne laŭ Dio, sed laŭ homoj. 24 Tiam
Jesuo diris al siaj disĉiploj: Se iu volas veni post mi, li
abnegaciu sin, kaj levu sian krucon, kaj sekvu min;
25 ĉar kiu volos savi sian animon, tiu ĝin perdos; kaj
kiu perdos sian animon pro mi, tiu ĝin trovos. 26 Ĉar
kiel profitus homo, se li gajnus la tutan mondon kaj
perdus sian animon? Aŭ kion homo donu interŝanĝe
por sia animo? 27 Ĉar la Filo de homo venos en la
gloro de sia Patro kun siaj anĝeloj, kaj tiam li redonos
al ĉiu laŭ liaj faroj. 28 Vere mi diras al vi: Inter la ĉi
tie starantaj estas iuj, kiuj neniel gustumos morton,
antaŭ ol ili vidos la Filon de homo venantan en sia
regno.

17 Kaj post ses tagoj Jesuo prenis kun si Petron, kaj
Jakobon, kaj Johanon, lian fraton, kaj kondukis
ilin sur altan monton aparte; 2 kaj li estis aliformita
antaŭ ili, kaj lia vizaĝo lumis kiel la suno, kaj liaj
vestoj fariĝis blankaj kiel la lumo. 3 Kaj jen aperis
al ili Moseo kaj Elija, parolantaj kun li. 4 Kaj Petro
responde diris al Jesuo: Sinjoro, estas bone por ni esti
ĉi tie. Se vi volas, mi faros ĉi tie tri laŭbojn: unu por
vi, kaj unu por Moseo, kaj unu por Elija. 5 Dum li
ankoraŭ parolis, jen luma nubo superombris ilin; kaj
jen voĉo el la nubo, dirante: Ĉi tiu estas Mia Filo, la
amata, en kiu Mi havas plezuron; aŭskultu lin. 6 Kaj
aŭdinte tion, la disĉiploj falis sur sian vizaĝon, kaj tre
timis. 7 Kaj Jesuo alvenis kaj ektuŝis ilin, kaj diris:
Leviĝu, kaj ne timu. 8 Kaj levinte siajn okulojn, ili vidis
neniun krom Jesuo sola. 9 Kaj dum ili malsupreniris
de la monto, Jesuo ordonis al ili, dirante: Rakontu
al neniu la vizion, ĝis la Filo de homo releviĝos el la
mortintoj. 10 Kaj liaj disĉiploj demandis lin, dirante:
Kial do diras la skribistoj, ke Elija devas veni antaŭe?
11 Kaj li responde diris: Vere Elija venas antaŭe, kaj
restarigos ĉion; 12 sed mi diras al vi, ke Elija jam
venis, kaj oni ne konis lin, sed faris al li ĉion, kion
ili volis. Tiel ankaŭ la Filo de homo estas suferonta
sub ili. 13 Tiam la disĉiploj komprenis, ke li parolis
al ili pri Johano, la Baptisto. 14 Kaj kiam li venis al
la homamaso, venis al li viro, genuante antaŭ li, kaj
dirante: 15 Sinjoro, kompatu mian filon, ĉar li frenezas
kaj forte suferas; ĉar ofte li falas en la fajron kaj ofte
en la akvon. 16 Kaj mi venigis lin al viaj disĉiploj, kaj
ili ne povis lin sanigi. 17 Kaj Jesuo responde diris: Ho
senfida kaj perversa generacio, ĝis kiam mi estos kun
vi? ĝis kiam mi toleros vin? venigu lin al mi ĉi tien. 18
Kaj Jesuo severe admonis lin; kaj la demono eliris el
li, kaj la knabo resaniĝis en tiu sama horo. 19 Tiam
la disĉiploj, veninte al Jesuo aparte, diris: Pro kio ni
ne povis elpeli ĝin? 20 Kaj li respondis al ili: Pro la
malgrandeco de via fido; ĉar vere mi diras al vi: Se vi
havas fidon, kiel semero de sinapo, vi diros al ĉi tiu
monto: Translokiĝu tien de ĉi tie, kaj ĝi translokiĝos;
kaj nenio estos neebla por vi. 21 Sed ĉi tiu speco ne
eliras, krom per preĝado kaj fastado. 22 Kaj kiam ili
kolektiĝis en Galileo, Jesuo diris al ili: La Filo de homo
estos transdonita en la manojn de homoj; 23 kaj ili
mortigos lin, kaj la trian tagon li leviĝos. Kaj ili tre
malĝojis. 24 Kaj kiam ili venis en Kapernaumon, venis
al Petro la ricevistoj de la du draĥmoj, kaj diris: Ĉu via
majstro pagas la du draĥmojn? 25 Li respondis: Jes.
Kaj kiam li venis en la domon, Jesuo unue parolis al li,
dirante: Kiel ŝajnas al vi, Simon? de kiuj prenas la
reĝoj de la tero imposton aŭ tributon? de siaj filoj aŭ
de la fremduloj? 26 Kaj kiam li diris: De la fremduloj;
Jesuo diris: Sekve la filoj estas liberaj. 27 Sed, por ke
ni ne ofendu ilin, iru al la maro kaj ĵetu hoketon, kaj
prenu la fiŝon unue venintan, kaj malferminte ĝian
buŝon, vi trovos stateron. Prenu ĝin, kaj donu al ili
por mi kaj vi.

18 En tiu horo la disĉiploj venis al Jesuo, dirante:
Kiu do estas la plej granda en la regno de la
ĉielo? 2 Kaj alvokinte al si infanon, li starigis ĝin
meze de ili, 3 kaj diris: Vere mi diras al vi: Se vi ne
turniĝos kaj ne fariĝos kiel infanoj, vi neniel eniros
en la regnon de la ĉielo. 4 Kiu do humiligos sin, kiel
ĉi tiu infano, tiu estas la plej granda en la regno de
la ĉielo. 5 Kaj kiu akceptos unu tian infanon en mia
nomo, tiu akceptas min; 6 sed kiu igos fali unu el ĉi
tiuj malgranduloj, kiuj kredas al mi, estus pli bone
por tiu, se granda muelŝtono estus pendigita ĉirkaŭ
lia kolo, kaj se li estus subakvigita en la profundon

de la maro. 7 Ve al la mondo pro faliloj! ĉar estas
necese, ke venu faliloj, sed ve al tiu homo, per kiu la
falilo venas! 8 Kaj se via mano aŭ via piedo faligas
vin, detranĉu ĝin kaj forĵetu ĝin de vi: estas bone por
vi eniri en vivon kripla aŭ lama prefere ol, havante
du manojn aŭ du piedojn, esti enĵetita en la eternan
fajron. (aiōnios g166) 9 Kaj se via okulo faligas vin, elŝiru
ĝin kaj forĵetu ĝin de vi; estas bone por vi eniri en
vivon unuokula prefere ol, havante du okulojn, esti
enĵetita en Gehenan de fajro. (Geenna g1067) 10 Gardu
vin, ke vi ne malestimu unu el tiuj malgranduloj; ĉar
mi diras al vi, ke iliaj anĝeloj en la ĉielo ĉiam rigardas
la vizaĝon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo. 11 Ĉar la
Filo de homo venis, por savi tion, kio estis perdita. 12
Kiel vi pensas? Se viro havas cent ŝafojn, kaj unu el
ili erarvagis, ĉu li ne lasas la naŭdek naŭ, kaj iras al
la montoj, kaj serĉas tiun, kiu erarvagis? 13 Kaj se
okazas, ke li trovas ĝin, vere mi diras al vi, li plimulte
ĝojas pri ĝi, ol pri la naŭdek naŭ, kiuj ne erarvagis.
14 Tiel same ne estas la volo de via Patro, kiu estas
en la ĉielo, ke unu el ĉi tiuj malgranduloj pereu. 15
Kaj se via frato pekos kontraŭ vi, iru kaj montru al li
la kulpon inter vi kaj li sola. Se li aŭskultos vin, vi
gajnos vian fraton. 16 Sed se li ne aŭskultos, prenu
ankaŭ unu aŭ du kun vi, por ke per la buŝo de du aŭ
tri atestantoj ĉiu vorto estu konfirmita. 17 Kaj se li
rifuzos aŭskulti ilin, diru la aferon al la eklezio; kaj se
li ankaŭ rifuzos aŭskulti la eklezion, li estu por vi kiel
fremdulo kaj impostisto. 18 Vere mi diras al vi, ke ĉio,
kion vi ligos sur la tero, estos ligita en la ĉielo; kaj ĉio,
kion vi malligos sur la tero, estos malligita en la ĉielo.
19 Cetere mi diras al vi, ke se du el vi konsentos sur
la tero pri ia pripetota afero, ĝi estos farita al ili de
mia Patro, kiu estas en la ĉielo. 20 Ĉar kie du aŭ tri
kunvenas en mia nomo, tie mi estas meze de ili. 21
Tiam Petro venis kaj diris al li: Sinjoro, kiomfoje povu
peki mia frato kontraŭ mi, kaj mi pardonu lin? ĝis
sep fojoj? 22 Jesuo diris al li: Mi ne diras al vi: Ĝis sep
fojoj; sed: Ĝis sepdekoble sep fojoj. 23 Tial la regno de
la ĉielo similas al reĝo, kiu volis fari kalkulon kun siaj
servistoj. 24 Kaj kiam li komencis la kunkalkuladon,
oni alkondukis al li unu, kiu estis ŝuldanto por dek
mil talantoj. 25 Sed ĉar li ne havis, per kio pagi, lia
sinjoro ordonis, ke estu venditaj li kaj lia edzino kaj
liaj infanoj, kaj ĉio, kion li posedis, kaj ke estu pago.
26 Tiam la servisto, falinte, kliniĝis antaŭ li, dirante:
Sinjoro, paciencu pri mi, kaj mi pagos al vi ĉion. 27
Kaj la sinjoro de tiu servisto, kortuŝite, liberigis lin
kaj pardonis al li la ŝuldon. 28 Sed elirinte, tiu servisto
trovis kunserviston, kiu ŝuldis al li cent denarojn; kaj
li kaptis kaj eksufokis lin, dirante: Pagu tion, kion vi
ŝuldas. 29 Kaj falinte antaŭ li, la kunservisto petegis
lin, dirante: Paciencu pri mi, kaj mi pagos al vi. 30 Sed
li ne volis; sed foriris kaj ĵetis lin en malliberejon, ĝis li
pagos tion, kio estas ŝuldata. 31 Tiam liaj kunservistoj,
vidinte tion, kio okazis, tre ĉagreniĝis; kaj veninte,
rakontis al sia sinjoro ĉion, kio okazis. 32 Tiam lia
sinjoro, alvokinte lin, diris: Vi malbona servisto, mi
pardonis al vi tiun tutan ŝuldon, ĉar vi petegis min;
33 ĉu vi ankaŭ ne devis kompati vian kunserviston,
kiel mi kompatis vin? 34 Kaj lia sinjoro koleris, kaj
transdonis lin al la turmentistoj, ĝis li pagos ĉion al li
ŝuldatan. 35 Tiel same mia ĉiela Patro faros al vi, se vi
ne pardonas el viaj koroj, ĉiu al sia frato.

**19** Kaj kiam Jesuo finis ĉi tiujn parolojn, li foriris
el Galileo, kaj venis en la limojn de Judujo trans
Jordan; 2 kaj grandaj homamasoj lin sekvis, kaj li
sanigis ilin tie. 3 Kaj venis al li Fariseoj, provante
lin, kaj dirante: Ĉu estas permesate forsendi sian
edzinon pro ĉia kaŭzo? 4 Kaj responde li diris: Ĉu vi
ne legis, ke en la komenco la Kreinto faris ilin vira kaj
virina, 5 kaj diris: Tial viro forlasos sian patron kaj
sian patrinon, kaj aliĝos al sia edzino; kaj ili estos unu
karno? 6 Sekve ili jam estas ne du, sed unu karno.
Kion do Dio kunigis, tion homo ne disigu. 7 Ili diris al
li: Kial do Moseo ordonis doni eksedzigan leteron, kaj
forsendi ŝin? 8 Li diris al ili: Moseo, pro la malmoleco
de via koro, permesis al vi forsendi viajn edzinojn;
sed ne estis tiel de la komenco. 9 Sed mi diras al vi:
Kiu forsendos sian edzinon krom pro malĉasteco, kaj
edziĝos kun alia, tiu adultas; kaj kiu edziĝas kun la
forsenditino, tiu adultas. 10 La disĉiploj diris al li: Se
tia estas la rilato de viro al virino, ne estas oportune
edziĝi. 11 Sed li diris al ili: Ne ĉiuj homoj akceptas ĉi
tiun diron, sed nur tiuj, al kiuj tio estas donita. 12
Ĉar estas eŭnukoj, kiuj estas naskitaj tiaj el la patrina
ventro; kaj estas eŭnukoj, kiuj estis eŭnukigitaj de
homoj; kaj estas eŭnukoj, kiuj eŭnukigis sin pro la
regno de la ĉielo. Kiu povas tion akcepti, tiu akceptu.
13 Tiam oni venigis al li infanojn, por ke li metu la
manojn sur ilin kaj preĝu; kaj la disĉiploj admonis ilin.
14 Sed Jesuo diris: Lasu la infanojn, kaj ne malhelpu
ilin, veni al mi; ĉar el tiaj estas la regno de la ĉielo.

15 Kaj metinte la manojn sur ilin, li foriris de tie. 16
Kaj jen unu viro, veninte al li, diris: Majstro, kian
bonon mi faru, por ke mi ricevu eternan vivon? (aiōnios
g166) 17 Li diris al li: Kial vi min demandas pri bono?
Ekzistas Unu, kiu estas bona; sed se vi deziras eniri en
la vivon, observu la ordonojn. 18 Li diris al li: Kiujn?
Kaj Jesuo diris: Ne mortigu; Ne adultu; Ne ŝtelu; Ne
parolu malveran ateston; 19 Respektu vian patron kaj
vian patrinon; kaj: Amu vian proksimulon kiel vin
mem. 20 La junulo diris al li: Ĉion tion mi observis;
kio ankoraŭ mankas al mi? 21 Jesuo diris al li: Se vi
deziras esti perfekta, iru, vendu viajn posedaĵojn, kaj
donu al malriĉuloj, kaj vi havos trezoron en la ĉielo;
kaj venu, sekvu min. 22 Sed aŭdinte tiun diron, la
junulo foriris malĝoja, ĉar li havis multajn posedaĵojn.
23 Kaj Jesuo diris al siaj disĉiploj: Vere mi diras al vi:
Malfacile riĉulo eniros en la regnon de la ĉielo. 24
Kaj cetere mi diras al vi: Estas pli facile por kamelo
iri tra trueton de kudrilo, ol por riĉulo eniri en la
regnon de Dio. 25 Kiam la disĉiploj tion aŭdis, ili forte
miregis, dirante: Kiu do povas esti savita? 26 Kaj Jesuo,
rigardante ilin, diris al ili: Ĉe homoj tio estas neebla,
sed ĉe Dio ĉio estas ebla. 27 Tiam Petro responde diris
al li: Jen ni ĉion forlasis, kaj vin sekvis; kion do ni
havos? 28 Jesuo diris al ili: Vere mi diras al vi, ke vi,
kiuj min sekvis, en la renaskado, kiam la Filo de homo
sidos sur la trono de sia gloro, vi ankaŭ sidos sur dek
du tronoj, juĝante la dek du tribojn de Izrael. 29 Kaj
ĉiu, kiu forlasis domojn aŭ fratojn aŭ fratinojn aŭ
patron aŭ patrinon aŭ infanojn aŭ kampojn pro mia
nomo, ricevos multoble kaj heredos eternan vivon.
(aiōnios g166) 30 Sed multaj unuaj estos lastaj, kaj lastaj
estos unuaj.

20 Ĉar la regno de la ĉielo similas al domomastro,
kiu eliris frumatene, por dungi laboristojn por
sia vinberĝardeno. 2 Kaj kontraktinte kun la laboristoj
po unu denaro por la tago, li ilin sendis en sian
vinberejon. 3 Kaj elirinte ĉirkaŭ la tria horo, li vidis
aliajn starantajn senokupe sur la placo; 4 kaj li diris al
ili: Vi ankaŭ iru en la vinberejon, kaj kiom estas justa,
tiom mi donos al vi. Kaj ili iris. 5 Denove elirinte ĉirkaŭ
la sesa horo kaj la naŭa, li agis simile. 6 Kaj elirinte
ĉirkaŭ la dek-unua horo, li trovis aliajn starantajn;
kaj li diris al ili: Kial vi staras ĉi tie senokupe la
tutan tagon? 7 Ili diris al li: Ĉar neniu nin dungis.
Li diris al ili: Vi ankaŭ iru en la vinberejon. 8 Kaj
kiam vesperiĝis, la sinjoro de la vinberejo diris al sia
administranto: Alvoku la laboristojn, kaj donu al ili la
salajron, komencante de la lastaj ĝis la unuaj. 9 Kaj
venis tiuj, kiuj estis dungitaj ĉirkaŭ la dek-unua horo,
kaj ili ricevis po unu denaro. 10 Kaj kiam la unuaj
venis, ili supozis, ke ili ricevos pli; kaj ili ankaŭ ricevis
po unu denaro. 11 Kaj tion ricevinte, ili murmuris
kontraŭ la domomastro, 12 dirante: Tiuj lastaj laboris
nur unu horon, kaj vi faris ilin egalaj kun ni, kiuj
elportis la ŝarĝon de la tago kaj la varmegon. 13 Sed
li responde diris al unu el ili: Amiko, mi ne faras al
vi maljustaĵon; ĉu vi ne kontraktis kun mi por unu
denaro? 14 Prenu do la vian kaj foriru; mi volas doni
al ĉi tiu lasta tiel same, kiel al vi. 15 Ĉu ne estas
permesate al mi, fari kun la mia tion, kion mi volas?
aŭ ĉu via okulo estas malbona tial, ke mi estas bona?
16 Tiel la lastaj estos unuaj, kaj la unuaj estos lastaj.
17 Kaj suprenirante al Jerusalem, Jesuo prenis la dek
du disĉiplojn aparte, kaj sur la vojo li diris al ili: 18
Jen ni supreniras al Jerusalem; kaj la Filo de homo
estos transdonita al la ĉefpastroj kaj skribistoj; kaj ili
kondamnos lin al morto, 19 kaj transdonos lin al la
nacianoj, por moki kaj skurĝi kaj krucumi; kaj la trian
tagon li releviĝos. 20 Tiam venis al li la patrino de
la filoj de Zebedeo, kun siaj filoj, adorkliniĝante kaj
farante al li peton. 21 Li diris al ŝi: Kion vi volas? Ŝi
diris al li: Ordonu, ke ĉi tiuj miaj du filoj povu sidi,
unu dekstre de vi kaj la dua maldekstre, en via regno.
22 Sed Jesuo responde diris: Vi ne scias, kion vi petas.
Ĉu vi povas trinki la kalikon, kiun mi trinkos? Ili diris
al li: Ni povas. 23 Li diris al ili: Mian kalikon vi ja
trinkos; sed sidi dekstre de mi kaj maldekstre, tion
doni ne apartenas al mi, sed ĝi estas por tiuj, por kiuj
ĝi estas preparita de mia Patro. 24 Kaj aŭdinte, la dek
indignis kontraŭ la du fratoj. 25 Sed Jesuo, alvokinte
ilin al si, diris: Vi scias, ke la regantoj de la nacioj
kondutas kiel sinjoroj super ili, kaj iliaj granduloj
ekzercas aŭtoritaton super ili. 26 Ne tiel estos inter
vi; sed kiu volas esti granda inter vi, tiu estu via
servanto; 27 kaj kiu volas esti la unua inter vi, tiu
estu via servisto; 28 same kiel la Filo de homo venis,
ne por esti servata, sed por servi, kaj por doni sian
vivon kiel elaĉeton por multaj. 29 Kaj kiam ili eliris
el Jeriĥo, granda homamaso lin sekvis. 30 Kaj jen du
blinduloj, sidantaj apud la vojo, aŭdinte, ke Jesuo
preterpasas, ekkriis, dirante: Sinjoro, kompatu nin,
ho filo de David. 31 Kaj la homamaso admonis ilin,

ke ili silentu, sed ili plimulte kriis, dirante: Sinjoro,
kompatu nin, ho filo de David. 32 Kaj Jesuo, haltinte,
alvokis ilin, kaj diris: Kion vi volas, ke mi faru al vi? 33
Ili diris al li: Sinjoro, ke niaj okuloj estu malfermitaj.
34 Kaj Jesuo, kortuŝite, tuŝis iliajn okulojn; kaj tuj ili
ricevis vidpovon, kaj sekvis lin.

**21** Kaj kiam ili alproksimiĝis al Jerusalem, kaj venis
al Betfage, al la monto Olivarba, tiam Jesuo
sendis du disĉiplojn, 2 dirante al ili: Iru en la vilaĝon,
kiu estas kontraŭ vi, kaj vi tuj trovos azeninon ligitan,
kaj azenidon kun ĝi. Ilin malligu kaj alkonduku al
mi. 3 Kaj se iu diros ion al vi, respondu: La Sinjoro
bezonas ilin; kaj tuj li sendos ilin. 4 Kaj ĉi tio okazis,
por ke plenumiĝu tio, kio estis dirita per la profeto,
nome: 5 Diru al la filino de Cion: Jen via Reĝo iras al
vi, Humila kaj rajdanta sur azeno, Kaj azenido, filo
de ŝarĝobesto. 6 Kaj la disĉiploj iris, kaj faris, kiel
Jesuo ordonis al ili, 7 kaj alkondukis la azeninon kaj la
azenidon, kaj surmetis sur ilin siajn vestojn; kaj li sidis
sur tion. 8 Kaj la pli granda parto de la homamaso
sternis siajn vestojn sur la vojo; kaj aliaj detranĉis
branĉojn de la arboj, kaj dismetis ilin sur la vojon. 9
Kaj la homamaso, kiu iris antaŭ li, kaj kiu sekvis lin,
kriis, dirante: Hosana al la Filo de David! Estu benata
tiu, kiu venas en la nomo de la Eternulo; Hosana en
la supera alto! 10 Kaj li eniris en Jerusalemon, kaj la
tuta urbo malkvietiĝis, dirante: Kiu estas ĉi tiu? 11 Kaj
la homamasoj diris: Ĉi tiu estas la profeto, Jesuo el
Nazaret en Galileo. 12 Kaj Jesuo eniris en la templon
de Dio, kaj elpelis ĉiujn vendantojn kaj aĉetantojn en
la templo, kaj renversis la tablojn de la monŝanĝistoj,
kaj la seĝojn de la vendantoj de kolomboj; 13 kaj li
diris al ili: Estas skribite: Mia domo estas nomata
domo de preĝo; sed vi faris ĝin kaverno de rabistoj.
14 Kaj blinduloj kaj lamuloj venis al li en la templo,
kaj li sanigis ilin. 15 Sed la ĉefpastroj kaj skribistoj,
vidinte la mirindaĵojn, kiujn li faris, kaj la knabojn
kriantajn en la templo, kaj dirantajn: Hosana al la Filo
de David, indignis, 16 kaj diris al li: Ĉu vi aŭdas, kion
ĉi tiuj diras? Kaj Jesuo diris al ili: Jes; ĉu vi neniam
legis: El la buŝo de junaj infanoj kaj suĉinfanoj Vi
perfektigis laŭdon? 17 Kaj lasinte ilin, li eliris el la
urbo al Betania, kaj tie loĝis. 18 Kaj matene, dum li
revenis al la urbo, li malsatis. 19 Kaj vidante figarbon
apud la vojo, li iris al ĝi, kaj trovis sur ĝi nenion krom
folioj; kaj li diris al ĝi: Ne plu estu frukto sur vi por
eterne. Kaj tuj la figarbo forvelkis. **(aiōn g165)** 20 Kaj
kiam la disĉiploj vidis, ili miris, dirante: Kiel rapide la
figarbo forvelkis! 21 Kaj Jesuo responde diris al ili:
Vere mi diras al vi: Se vi havos fidon kaj ne dubos,
vi ne nur faros la aferon de la figarbo, sed eĉ se vi
diros al ĉi tiu monto: Estu formovita kaj ĵetita en
la maron; tio plenumiĝos. 22 Kaj ĉion, kion vi petos
per preĝado, kredante, vi ricevos. 23 Kaj kiam li jam
venis en la templon, la ĉefpastroj kaj la pliaĝuloj de la
popolo venis al li, dum li instruis, kaj ili diris: Laŭ
kia aŭtoritato vi faras ĉi tion? kaj kiu donis al vi tian
aŭtoritaton? 24 Kaj Jesuo responde diris al ili: Mi
ankaŭ faros al vi unu demandon; kaj se vi tion diros al
mi, mi ankaŭ diros al vi, laŭ kia aŭtoritato mi faras ĉi
tion. 25 La baptado de Johano, de kie ĝi estis? El la
ĉielo, aŭ el homoj? Kaj ili diskutis inter si, dirante: Se
ni diros: El la ĉielo, li diros al ni: Kial do vi ne kredis al
li? 26 Sed se ni diros: El homoj, ni timas la popolon,
ĉar ĉiuj opinias Johanon profeto. 27 Kaj ili responde
diris al Jesuo: Ni ne scias. Li ankaŭ diris al ili: Kaj mi
ne diras al vi, laŭ kia aŭtoritato mi faras ĉi tion. 28
Kiel ŝajnas al vi? Unu viro havis du filojn; kaj li venis
al la unua, kaj diris: Filo, iru hodiaŭ kaj laboru en la
vinberĝardeno. 29 Kaj li respondis kaj diris: Mi ne
volas; sed poste li pentis kaj iris. 30 Kaj li venis al la
dua, kaj diris tion saman. Kaj li responde diris: Mi
iros, sinjoro; kaj ne iris. 31 Kiu el la du plenumis la
volon de la patro? Ili diris: La unua. Jesuo diris al ili:
Vere mi diras al vi, ke la impostistoj kaj malĉastistinoj
iras antaŭ vi en la regnon de Dio. 32 Ĉar Johano venis
al vi en vojo de justeco, kaj vi ne kredis al li; sed la
impostistoj kaj malĉastistinoj kredis al li. Kaj vi, kiam
vi vidis, eĉ ne pentis poste, por kredi al li. 33 Aŭskultu
alian parabolon: Estis viro dommastro, kiu plantis
vinberĝardenon, kaj ĉirkaŭmetis plektobarilon, kaj
fosis en ĝi vinpremejon, kaj konstruis turon, kaj
luigis ĝin al kultivistoj, kaj forvojaĝis. 34 Kaj kiam
alproksimiĝis la sezono de fruktoj, li sendis siajn
sklavojn al la kultivistoj, por ricevi siajn fruktojn. 35
Kaj la kultivistoj, kaptinte liajn sklavojn, skurĝis unu,
kaj mortigis alian, kaj ŝtonbatis alian. 36 Li sendis
ankoraŭ aliajn sklavojn, pli multajn ol la unuaj; kaj
ili faris al ili tiel same. 37 Sed poste li sendis al ili
sian filon, dirante: Ili respektos mian filon. 38 Sed
la kultivistoj, vidante la filon, diris inter si: Ĉi tiu
estas la heredonto; venu, ni lin mortigu, kaj prenu
lian heredaĵon. 39 Kaj ili kaptis lin, elĵetis lin el la

vinberejo, kaj mortigis lin. 40 Kiam do venos la sinjoro
de la vinberejo, kion li faros al tiuj kultivistoj? 41 Ili
diris al li: Tiujn malbonulojn li mizere pereigos, kaj li
luigos la vinberejon al aliaj kultivistoj, kiuj donos al li
la fruktojn en iliaj sezonoj. 42 Jesuo diris al ili: Ĉu vi
neniam legis en la Skriboj: Ŝtono, kiun malŝatis la
konstruantoj, Fariĝis ŝtono bazangula: De la Eternulo
ĉi tio fariĝis, Kaj ĝi estas miraklo en niaj okuloj? 43
Tial mi diras al vi: La regno de Dio estos prenita for de
vi, kaj estos donita al nacio, kiu liveros ĝiajn fruktojn.
44 Kaj kiu falas sur tiun ŝtonon, tiu rompiĝos; sed sur
kiun ĝi falos, ĝi tiun polvigos. 45 Kaj la ĉefpastroj kaj
la Fariseoj, aŭdinte liajn parabolojn, komprenis, ke
li parolas pri ili. 46 Kaj celante kapti lin, ili timis la
popolon, ĉar oni opiniis lin profeto.

**22** Kaj respondante, Jesuo denove parolis al ili
parabole, dirante: 2 La regno de la ĉielo similas
al unu reĝo, kiu faris edziĝan feston por sia filo, 3 kaj
sendis siajn sklavojn, por voki la invititojn al la edziĝa
festo; kaj ili ne volis veni. 4 Poste li sendis aliajn
sklavojn, dirante: Diru al la invititoj: Jen mi preparis
la manĝon; miaj bovoj kaj miaj grasigitaj brutoj estas
buĉitaj, kaj ĉio estas preta; venu al la edziĝa festo. 5
Sed ili malatentis, kaj foriris, unu al sia bieno, alia al
sia komercado; 6 kaj la ceteraj, kaptinte liajn sklavojn,
perfortis kaj mortigis ilin. 7 Kaj la reĝo koleris; kaj
sendinte siajn armeojn, li pereigis tiujn mortigintojn
kaj bruligis ilian urbon. 8 Tiam li diris al siaj sklavoj:
La edziĝa festo estas preta, sed la invititoj ne estis
indaj. 9 Iru do al la disirejoj de la vojoj, kaj ĉiujn, kiujn
vi trovos, invitu al la edziĝa festo. 10 Kaj tiuj sklavoj,
elirinte sur la vojojn, kunvenigis ĉiujn, kiujn ili trovis,
malbonajn kaj bonajn; kaj la edziĝa festo pleniĝis de
gastoj. 11 Sed la reĝo, enveninte por rigardi la gastojn,
tie vidis viron, kiu ne havis sur si edziĝofestan veston;
12 kaj li diris al li: Amiko, kiel vi envenis ĉi tien, ne
havante edziĝofestan veston? Kaj li silentadis. 13 Tiam
la reĝo diris al siaj servantoj: Ligu lin mane kaj piede,
kaj elĵetu lin en la eksteran mallumon; tie estos la
plorado kaj la grincado de dentoj. 14 Ĉar multaj estas
vokitaj, sed malmultaj estas elektitaj. 15 Tiam iris la
Fariseoj, kaj konsiliĝis, kiel ili povos impliki lin per
interparolado. 16 Kaj ili sendis al li siajn disĉiplojn
kun la Herodanoj, por diri: Majstro, ni scias, ke vi
estas verama, kaj instruas laŭ vero la vojon de Dio, kaj
ne zorgas pri iu ajn; ĉar vi ne favoras la personon de
homoj. 17 Diru do al ni, kiel ŝajnas al vi? ĉu konvenas
doni tributon al Cezaro, aŭ ne? 18 Sed Jesuo, sciante
ilian ruzecon, diris: Kial vi min provas, hipokrituloj?
19 Montru al mi la tributan moneron. Kaj ili alportis al
li denaron. 20 Kaj li diris al ili: Kies estas ĉi tiu bildo
kaj la surskribaĵo? 21 Ili diris al li: De Cezaro. Tiam
li diris al ili: Redonu do al Cezaro la propraĵon de
Cezaro, kaj al Dio la propraĵon de Dio. 22 Kaj aŭdinte,
ili miris, kaj lin lasis kaj foriris. 23 En tiu sama tago
alvenis al li Sadukeoj, kiuj diras, ke ne estas releviĝo;
kaj ili demandis lin, dirante: 24 Majstro, Moseo diris:
Se iu mortas, ne havante infanojn, lia frato edziĝu
kun lia edzino kaj naskigu idaron al sia frato. 25 Estis
ĉe ni sep fratoj; kaj la unua edziĝis kaj mortis, kaj ne
havante idaron, lasis sian edzinon al sia frato; 26 tiel
same ankaŭ la dua, kaj la tria, ĝis la sepa. 27 Kaj post
ĉiuj la virino mortis. 28 En la releviĝo do, por kiu el la
sep ŝi estos edzino? ĉar ĉiuj ŝin havis. 29 Sed Jesuo
responde diris: Vi eraras, ne sciante la Skribojn, nek la
potencon de Dio. 30 Ĉar en la releviĝo oni nek edziĝas
nek edziniĝas, sed estas kiel anĝeloj en la ĉielo. 31 Sed
pri la releviĝo el la mortintoj, ĉu vi ne legis tion, kio
estis dirita al vi de Dio, nome: 32 Mi estas la Dio de
Abraham kaj la Dio de Isaak kaj la Dio de Jakob? Dio
estas Dio ne de la mortintoj, sed de la vivantoj. 33
Kaj kiam la homamaso tion aŭdis, ili miregis pro lia
instruado. 34 Sed la Fariseoj, aŭdinte, ke li silentigis la
Sadukeojn, kune kolektiĝis. 35 Kaj unu el ili, leĝisto,
demandis lin, provante lin: 36 Majstro, kiu estas la
granda ordono en la leĝo? 37 Kaj li diris al li: Amu la
Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via
tuta animo kaj per via tuta menso. 38 Ĉi tiu estas la
granda kaj la unua ordono. 39 Kaj dua estas simila al
ĝi: Amu vian proksimulon kiel vin mem. 40 De ĉi tiuj
du ordonoj dependas la tuta leĝo kaj la profetoj. 41 Kaj
kiam la Fariseoj jam kunvenis, Jesuo ilin demandis,
42 dirante: Kion vi pensas pri la Kristo? kies filo li
estas? Ili diris al li: De David. 43 Li diris al ili: Kial do
David, en la Spirito, lin nomas Sinjoro, dirante: 44 La
Eternulo diris al mia Sinjoro: Sidu dekstre de Mi, Ĝis
Mi faros viajn malamikojn benketo por viaj piedoj? 45
Se do David nomas lin Sinjoro, kiel li estas lia filo? 46
Kaj neniu povis respondi unu vorton al li, nek iu post
tiu tago plu kuraĝis fari al li demandon.

**23** Tiam parolis Jesuo al la homamasoj kaj al siaj
disĉiploj, dirante: 2 La skribistoj kaj la Fariseoj

sidas sur la seĝo de Moseo: 3 ĉion do, kion ili ordonas
al vi, faru kaj observu; sed ne agu laŭ iliaj faroj, ĉar
ili ordonas, sed ne faras. 4 Ili ligas pezajn ŝarĝojn
malfacile porteblajn, kaj metas ilin sur la ŝultrojn de
homoj; sed ili mem ne volas movi ilin per sia fingro. 5
Sed ĉiujn siajn agojn ili faras, por esti rigardataj de
homoj; ĉar ili larĝigas siajn filakteriojn kaj grandigas
la franĝojn de siaj vestoj, 6 kaj amas la ĉeflokojn
ĉe festenoj, kaj la ĉefseĝojn en la sinagogoj, 7 kaj
salutojn sur la placoj, kaj esti nomataj de homoj
Rabeno. 8 Sed vi ne estu nomataj Rabeno; ĉar unu
estas via instruanto, kaj vi ĉiuj estas fratoj. 9 Kaj
nomu neniun sur la tero via patro; ĉar Unu, kiu estas
en la ĉielo, estas via Patro. 10 Kaj ne estu nomataj
edukantoj; ĉar unu, la Kristo, estas via edukanto. 11
Sed la pli granda el vi estos via servanto. 12 Kaj kiu sin
plialtigos, tiu estos humiligita; kaj kiu sin humiligos,
tiu estos plialtigita. 13 Sed ve al vi, skribistoj kaj
Fariseoj, hipokrituloj! ĉar vi ŝlosas la regnon de la
ĉielo kontraŭ la homoj; ĉar vi mem ne eniras, nek
lasas al la enirantoj eniri. 14 Ve al vi, skribistoj kaj
Fariseoj, hipokrituloj! ĉar vi formanĝas domojn de
vidvinoj, kaj por preteksto vi longe preĝas; tial vi
ricevos pli severan kondamnon. 15 Ve al vi, skribistoj
kaj Fariseoj, hipokrituloj! ĉar vi ĉirkaŭiras maron
kaj teron, por varbi unu prozeliton; kaj kiam li tia
fariĝis, vi lin faras filo de Gehena, duoble kiom vi
mem. **(Geenna g1067)** 16 Ve al vi, blindaj gvidantoj! kiuj
diras: Se iu ĵuras per la sanktejo, tio estas nenio; sed
kiu ĵuras per la oro de la sanktejo, tiu estas ŝuldanto.
17 Vi malsaĝaj kaj blindaj! ĉar kio estas pli granda, la
oro, aŭ la sanktejo, kiu sanktigas la oron? 18 Kaj: Se
iu ĵuras per la altaro, tio estas nenio; sed kiu ĵuras
per la ofero, kuŝanta sur ĝi, tiu estas ŝuldanto. 19
Vi blinduloj! ĉar kio estas pli granda, la ofero, aŭ la
altaro, kiu sanktigas la oferon? 20 Tiu do, kiu ĵuras
per la altaro, ĵuras per ĝi, kaj per ĉio, kuŝanta sur ĝi.
21 Kaj tiu, kiu ĵuras per la sanktejo, ĵuras per ĝi, kaj
per Tiu, kiu loĝas en ĝi. 22 Kaj tiu, kiu ĵuras per la
ĉielo, ĵuras per la trono de Dio, kaj per Tiu, kiu sidas
sur ĝi. 23 Ve al vi, skribistoj kaj Fariseoj, hipokrituloj!
ĉar vi pagas dekonaĵojn de mento kaj de anizo kaj de
kumino, kaj forlasis la pli gravajn aferojn de la leĝo:
juĝon kaj kompaton kaj fidon. Sed ĉi tiujn vi devus
fari, kaj la aliajn ne preterlasi. 24 Vi blindaj gvidantoj!
kiuj elkribras la kulon kaj glutas la kamelon. 25 Ve al
vi, skribistoj kaj Fariseoj, hipokrituloj! ĉar vi purigas
la eksteron de la kaliko kaj de la plado; sed interne
ili estas plenaj de rabado kaj malmodereco. 26 Vi
blinda Fariseo! purigu unue la internon de la kaliko
kaj de la plado, por ke ilia ekstero ankaŭ fariĝu pura.
27 Ve al vi, skribistoj kaj Fariseoj, hipokrituloj! ĉar
vi similas al tomboj blankigitaj, kiuj ekstere ŝajnas
belaj, sed interne estas plenaj de ostoj de mortintoj
kaj de ĉia malpureco. 28 Tiel ankaŭ vi ekstere ŝajnas
justaj antaŭ homoj, sed interne vi estas plenaj de
hipokriteco kaj maljusteco. 29 Ve al vi, skribistoj kaj
Fariseoj, hipokrituloj! ĉar vi konstruas la tombojn
de la profetoj kaj ornamas la monumentojn de la
justuloj, kaj diras: 30 Se ni vivus en la tagoj de niaj
patroj, ni ne partoprenus kun ili en la sango de la
profetoj. 31 Tial vi atestas pri vi mem, ke vi estas filoj
de tiuj, kiuj mortigis la profetojn. 32 Vi do plenigu
la mezuron de viaj patroj. 33 Serpentoj, vipuridoj!
kiel vi povos eviti la juĝon de Gehena? **(Geenna g1067)**
34 Jen do mi sendas al vi profetojn kaj saĝulojn kaj
skribistojn; iujn el ili vi mortigos kaj krucumos, kaj
aliajn el ili vi skurĝos en viaj sinagogoj kaj persekutos
de urbo al urbo; 35 por ke venu sur vin la tuta justa
sango elverŝita sur la teron, de la sango de la justulo
Habel ĝis la sango de Zeĥarja, filo de Bereĥja, kiun vi
mortigis inter la sanktejo kaj la altaro. 36 Vere mi
diras al vi: Ĉio tio venos sur ĉi tiun generacion. 37
Ho Jerusalem, Jerusalem, kiu mortigas la profetojn,
kaj priĵetas per ŝtonoj tiujn, kiuj estas senditaj al ĝi!
kiom ofte mi volis kolekti viajn infanojn, kiel kokino
kolektas sian idaron sub la flugilojn, kaj vi ne volis. 38
Jen via domo estas lasita al vi dezerta. 39 Ĉar mi diras
al vi: De nun vi ne vidos min, ĝis vi diros: Estu benata
tiu, kiu venas en la nomo de la Eternulo.

**24** Kaj Jesuo, elirinte, ekforiris de la templo; kaj
liaj disĉiploj venis al li, por montri al li la
konstruaĵojn de la templo. 2 Sed li responde diris al
ili: Ĉu vi ne vidas ĉion tion? vere mi diras al vi: Ne
estos lasita ĉi tie ŝtono sur ŝtono, kiu ne estos deĵetita.
3 Kaj dum ili sidis sur la monto Olivarba, la disĉiploj
venis aparte al li, dirante: Diru al ni, kiam tio estos?
Kaj kio estas la signo de via alesto kaj de la maturiĝo
de la mondaĝo? **(aiōn g165)** 4 Kaj Jesuo, respondante,
diris al ili: Gardu vin, ke neniu vin forlogu. 5 Ĉar
multaj venos en mia nomo, dirante: Mi estas la Kristo;
kaj ili forlogos multajn. 6 Kaj vi aŭdos pri militoj
kaj famoj de militoj. Zorgu, ke vi ne maltrankviliĝu;

ĉar tio devas okazi; sed ankoraŭ ne estas la fino. 7
Ĉar leviĝos nacio kontraŭ nacion, kaj regno kontraŭ
regnon; kaj estos malsatoj kaj tertremoj en diversaj
lokoj. 8 Sed ĉio tio estas komenco de suferoj. 9 Tiam
oni transdonos vin al afliktado, kaj mortigos vin; kaj
vi estos malamataj de ĉiuj nacioj pro mia nomo. 10
Tiam multaj ofendiĝos, kaj perfidos unu la alian, kaj
malamos unu la alian. 11 Kaj multaj falsaj profetoj
leviĝos, kaj forlogos multajn. 12 Kaj pro la multobligo
de maljusteco, la amo de la plimulto malvarmiĝos.
13 Sed kiu persistos ĝis la fino, tiu estos savita. 14
Kaj ĉi tiu evangelio de la regno estos predikita tra la
tuta mondo, kiel atesto al ĉiuj nacioj; kaj tiam venos
la fino. 15 Kiam do vi vidos la abomenindaĵon de
dezerteco, pri kiu estas dirite de la profeto Daniel,
starantan sur la sankta loko (la leganto komprenu), 16
tiam tiuj, kiuj estas en Judujo, forkuru al la montoj; 17
kiu estas sur la tegmento, tiu ne malsupreniru, por
preni ion el sia domo; 18 kaj kiu estas sur la kampo,
tiu ne revenu, por preni sian mantelon. 19 Sed ve al la
gravedulinoj kaj al la suĉigantinoj en tiuj tagoj! 20
Kaj preĝu, ke via forkurado ne estu en vintro nek
en sabato; 21 ĉar tiam estos granda aflikto tia, kia
ne estis de la komenco de la mondo ĝis nun, nek
iam estos. 22 Kaj se tiuj tagoj ne estus mallongigitaj,
neniu karno estus savita; sed pro la elektitoj tiuj tagoj
estos mallongigitaj. 23 Tiam se iu diros al vi: Jen ĉi
tie la Kristo, aŭ: Tie; ne kredu; 24 ĉar leviĝos falsaj
kristoj kaj falsaj profetoj kaj faros grandajn signojn kaj
miraklojn, tiel ke ili forlogus, se eble, eĉ la elektitojn.
25 Jen mi antaŭdiris al vi. 26 Se oni do diros al vi:
Jen li estas en la dezerto; ne eliru; aŭ: Jen li estas
en sekretaj ĉambroj; ne kredu. 27 Ĉar kiel la fulmo
venas el la oriento kaj montriĝas ĝis la okcidento,
tiel ankaŭ estos la alesto de la Filo de homo. 28 Kie
ajn estos la kadavro, tien kolektiĝos la agloj. 29 Sed
tuj post la aflikto de tiuj tagoj la suno mallumiĝos,
kaj la luno ne donos sian lumon, kaj la steloj falos
el la ĉielo, kaj la potencoj de la ĉielo ŝanceliĝos; 30
kaj tiam aperos sur la ĉielo la signo de la Filo de
homo, kaj tiam ploros ĉiuj gentoj de la tero, kaj oni
vidos la Filon de homo, venantan en la nuboj de la
ĉielo kun potenco kaj granda gloro. 31 Kaj li elsendos
siajn anĝelojn kun granda sono de trumpeto, kaj ili
kolektos liajn elektitojn el la kvar ventoj, el limo ĝis
limo de la ĉielo. 32 De la figarbo lernu ĝian parabolon:
kiam ĝia branĉo jam moliĝis kaj aperigas foliojn, tiam
vi scias, ke la somero estas proksima; 33 tiel same vi,
kiam vi vidos ĉion tion, tiam sciu, ke li estas proksima,
ĉe la pordoj. 34 Vere mi diras al vi: Ĉi tiu generacio
ne forpasos, ĝis ĉio tio plenumiĝos. 35 La ĉielo kaj la
tero forpasos, sed miaj vortoj ne forpasos. 36 Sed pri
tiu tago kaj la horo scias neniu, eĉ ne la anĝeloj de
la ĉielo, nek la Filo, sed la Patro sola. 37 Sed kiel la
tagoj de Noa, tiel estos la alesto de la Filo de homo. 38
Ĉar kiel dum la tagoj, kiuj estis antaŭ la diluvo, oni
manĝis kaj trinkis, edziĝis kaj edziniĝis, ĝis la tago,
kiam Noa eniris en la arkeon, 39 kaj oni ne eksciis, ĝis
la diluvo venis kaj forprenis ĉiujn; tiel estos la alesto
de la Filo de homo. 40 Tiam du viroj estos sur kampo:
unu estos prenita, kaj la alia lasita; 41 du virinoj estos
muelantaj apud muelilo: unu estos prenita, kaj la alia
lasita. 42 Tial viglu; ĉar vi ne scias, en kiu tago via
Sinjoro venos. 43 Sed sciu tion, ke se la dommastro
scius, en kiu gardoparto venos la ŝtelisto, li viglus
kaj ne lasus sian domon trafosiĝi. 44 Tial vi ankaŭ
estu pretaj; ĉar en horo, kiam vi ne atendas, la Filo de
homo venas. 45 Kiu do estas la fidela kaj prudenta
servisto, kiun la sinjoro starigis super siajn domanojn,
por doni al ili nutraĵon ĝustatempe? 46 Feliĉa estas tiu
servisto, kiun lia sinjoro, veninte, trovos tiel faranta.
47 Vere mi diras al vi, ke super sian tutan havon li
starigos lin. 48 Sed se tiu malbona servisto diros en sia
koro: Mia sinjoro malfruas; 49 kaj komencos bati siajn
kunservistojn, kaj manĝi kaj trinki kun la drinkuloj,
50 la sinjoro de tiu servisto venos en tago, kiam li ne
atendas, kaj en horo, kiam li ne scias, 51 kaj distranĉos
lin, kaj difinos lian parton kun la hipokrituloj; tie
estos la plorado kaj la grincado de dentoj.

25 Tiam la regno de la ĉielo estos komparata
al dek virgulinoj, kiuj prenis siajn lampojn
kaj eliris renkonte al la fianĉo. 2 Kaj kvin el ili
estis malprudentaj, kaj kvin estis prudentaj. 3 La
malprudentaj, prenante la lampojn, ne prenis oleon
kun si; 4 sed la prudentaj prenis oleon en la vazoj
kun siaj lampoj. 5 Kaj kiam la fianĉo malfruis, ili
ĉiuj malviglis kaj dormis. 6 Sed je la noktomezo estis
ekkrio: Jen la fianĉo! eliru al li renkonte. 7 Tiam ĉiuj
tiuj virgulinoj leviĝis, kaj ordigis siajn lampojn. 8
Kaj la malprudentaj diris al la prudentaj: Donu al
ni el via oleo, ĉar niaj lampoj estingiĝas. 9 Sed la
prudentaj respondis, dirante: Eble ne estos sufiĉe
por ni kaj vi; iru prefere al la vendistoj, kaj aĉetu

por vi mem. 10 Kaj dum ili iris, por aĉeti, alvenis la
fianĉo; kaj tiuj, kiuj estis pretaj, eniris kun li al la
edziĝa festo, kaj la pordo estis fermita. 11 Poste venis
ankaŭ la ceteraj virgulinoj, dirante: Sinjoro, sinjoro,
malfermu al ni. 12 Sed li responde diris: Vere mi diras
al vi: Mi vin ne konas. 13 Tial viglu, ĉar vi ne scias
la tagon nek la horon. 14 Ĉar tiel estas, kvazaŭ viro,
forvojaĝonte, alvokis siajn servistojn, kaj komisiis al ili
siajn posedaĵojn. 15 Kaj al unu li donis kvin talantojn,
al alia du, al alia unu; al ĉiu laŭ lia kapableco; kaj li tuj
forvojaĝis. 16 Kaj tiu, kiu ricevis la kvin talantojn, iris
kaj negocadis per ili, kaj gajnis pluajn kvin talantojn.
17 Tiel same ankaŭ tiu, kiu ricevis la du, gajnis pluajn
du. 18 Sed tiu, kiu ricevis la unu, foriris kaj fosis en la
tero, kaj kaŝis la monon de sia sinjoro. 19 Kaj post
longa tempo la sinjoro de tiuj servistoj venis, kaj
faris kun ili kalkulon. 20 Kaj tiu, kiu ricevis la kvin
talantojn, venis kaj alportis pluajn kvin talantojn,
dirante: Sinjoro, vi komisiis al mi kvin talantojn; jen
mi gajnis pluajn kvin talantojn. 21 Lia sinjoro diris
al li: Bone, vi bona kaj fidela servisto; vi estis fidela
pri malmultaj aferoj, mi starigos vin super multaj;
envenu en la ĝojon de via sinjoro. 22 Kaj venis ankaŭ
tiu, kiu ricevis la du talantojn, kaj diris: Sinjoro, vi
komisiis al mi du talantojn; jen mi gajnis pluajn du
talantojn. 23 Lia sinjoro diris al li: Bone, vi bona kaj
fidela servisto; vi estis fidela pri malmultaj aferoj,
mi starigos vin super multaj; envenu en la ĝojon de
via sinjoro. 24 Kaj venis ankaŭ tiu, kiu ricevis la unu
talanton, kaj diris: Sinjoro, mi sciis, ke vi estas severa
homo, rikoltanta, kie vi ne semis, kaj kolektanta, kie
vi ne disŝutis; 25 kaj mi timis, kaj foriris, kaj kaŝis vian
talanton en la tero; jen vi havas vian propraĵon. 26
Sed lia sinjoro responde diris al li: Vi malbona kaj
mallaborema servisto, vi sciis, ke mi rikoltas, kie mi
ne semis, kaj kolektas, kie mi ne disŝutis; 27 pro tio vi
devus doni mian monon al la bankistoj, kaj veninte,
mi ricevus mian propraĵon kun procento. 28 Forprenu
de li do la talanton, kaj donu ĝin al tiu, kiu havas la
dek talantojn. 29 Ĉar al ĉiu, kiu havas, estos donite,
kaj li havos abundegon; sed for de tiu, kiu ne havas,
eĉ tio, kion li havas, estos prenita. 30 Kaj elĵetu la
senutilan serviston en la eksteran mallumon; tie estos
la plorado kaj la grincado de dentoj. 31 Sed kiam la
Filo de homo venos en sia gloro, kaj ĉiuj anĝeloj kun
li, tiam li sidos sur la trono de sia gloro; 32 kaj antaŭ li
kolektiĝos ĉiuj nacioj, kaj li apartigos ilin unu de alia,
kiel paŝtisto apartigas la ŝafojn for de la kaproj; 33
kaj li starigos la ŝafojn dekstre de li, kaj la kaprojn
maldekstre. 34 Tiam diros la Reĝo al tiuj, kiuj staras
dekstre de li: Venu, vi benataj de mia Patro, heredu la
regnon preparitan por vi de post la komenco de la
mondo; 35 ĉar mi malsatis, kaj vi donis al mi manĝi;
mi soifis, kaj vi donis al mi trinki; mi estis fremda, kaj
vi gastigis min; 36 nuda, kaj vi vestis min; mi malsanis,
kaj vi vizitis min; mi estis en malliberejo, kaj vi venis
al mi. 37 Tiam respondos al li la justuloj, dirante:
Sinjoro, kiam ni vin vidis malsata, kaj vin satigis? aŭ
soifanta, kaj trinkigis vin? 38 Kaj kiam ni vidis vin
fremda kaj gastigis vin? aŭ nuda, kaj vin vestis? 39 Kaj
kiam ni vidis vin malsana aŭ en malliberejo, kaj venis
al vi? 40 Kaj la Reĝo respondos kaj diros al ili: Vere mi
diras al vi: Kiom vi faris al unu el ĉi tiuj miaj fratoj la
plej malgrandaj, tiom vi faris al mi. 41 Tiam li diros al
tiuj, kiuj staras maldekstre: For de mi, vi malbenitaj,
en la eternan fajron, kiu estas preparita por la diablo
kaj liaj anĝeloj; **(aiōnios g166)** 42 ĉar mi malsatis, kaj vi
ne donis al mi manĝi; mi soifis, kaj vi ne donis al mi
trinki; 43 mi estis fremda, kaj vi ne gastigis min; nuda,
kaj vi ne vestis min; malsana kaj en malliberejo, kaj vi
ne vizitis min. 44 Tiam ili ankaŭ respondos, dirante:
Sinjoro, kiam ni vidis vin malsata, aŭ soifanta, aŭ
fremda, aŭ nuda, aŭ malsana, aŭ en malliberejo, kaj
ne servis al vi? 45 Tiam li respondos al ili, dirante:
Vere mi diras al vi: Kiom vi ne faris al unu el ĉi tiuj la
plej malgrandaj, tiom vi ne faris al mi. 46 Kaj ĉi tiuj
foriros en eternan punon, sed la justuloj en eternan
vivon. **(aiōnios g166)**

**26** Kaj kiam Jesuo finis ĉiujn tiujn vortojn, li diris al
siaj disĉiploj: 2 Vi scias, ke post du tagoj okazos
la Pasko, kaj la Filo de homo estos transdonita, por
esti krucumita. 3 Tiam kunvenis la ĉefpastroj kaj la
pliaĝuloj de la popolo, en la korto de la ĉefpastro,
kies nomo estis Kajafas; 4 kaj ili konsiliĝis, por ke ili
povu per ruzo kapti Jesuon, kaj mortigi lin. 5 Sed ili
diris: Ne dum la festo, por ke ne leviĝu tumulto ĉe
la popolo. 6 Kaj kiam Jesuo estis en Betania, en la
domo de Simon, leprulo, 7 venis al li virino, havanta
alabastran vazon da multekosta ŝmiraĵo, kaj ŝi verŝis
ĝin sur lian kapon, dum li sidis ĉe manĝo. 8 Sed kiam
la disĉiploj tion vidis, ili indignis, dirante: 9 Por kio
estas ĉi tiu malŝparo? Ĉar ĉi tiun ŝmiraĵon oni povus
vendi por granda prezo, kaj doni al malriĉuloj. 10 Sed

Jesuo, tion sciante, diris al ili: Kial vi ĝenas la virinon?
ŝi faris bonan faron al mi. 11 Ĉar la malriĉulojn vi
ĉiam havas kun vi, sed min vi ne ĉiam havas. 12 Ĉar
verŝante ĉi tiun ŝmiraĵon sur mian korpon, ŝi tion
faris por mia entombigo. 13 Vere mi diras al vi: Kie
ajn estos predikata ĉi tiu evangelio en la tuta mondo,
tio ankaŭ, kion faris ĉi tiu virino, estos priparolata,
por memoraĵo de ŝi. 14 Tiam unu el la dek du, nomata
Judas Iskariota, iris al la ĉefpastroj, 15 kaj diris: Kion
vi volas doni al mi, se mi lin transdonos al vi? Kaj ili
pesis por li tridek arĝentajn monerojn. 16 Kaj de tiam
li serĉis okazon, por transdoni lin. 17 Kaj en la unua
tago de macoj la disĉiploj venis al Jesuo, dirante: Kie
vi volas, ke ni pretigu por vi, por manĝi la Paskon? 18
Kaj li diris: Iru en la urbon al trovotulo, kaj diru al li:
La Majstro diras: Mia tempo estas proksima; mi faros
la Paskon ĉe vi, kun miaj disĉiploj. 19 Kaj la disĉiploj
faris, kiel Jesuo ordonis al ili, kaj ili pretigis la Paskon.
20 Kaj kiam vesperiĝis, li sidis ĉe manĝo kun la dek
du disĉiploj; 21 kaj dum ili manĝis, li diris: Vere mi
diras al vi, ke unu el vi perfidos min. 22 Kaj ili tre
malĝojis, kaj ĉiu komencis diri al li: Sinjoro, ĉu eble
mi? 23 Kaj li respondis kaj diris: Tiu, kiu trempis kun
mi la manon en la pladon, perfidos min. 24 La Filo
de homo iros, kiel estas skribite pri li; sed ve al tiu
viro, de kiu la Filo de homo estos perfidita! se tiu
homo ne estus naskita, estus bone por li. 25 Kaj Judas,
kiu estis lin perfidonta, responde diris: Ĉu eble mi,
Rabeno? Li diris al li: Vi diris. 26 Kaj dum ili manĝis,
Jesuo prenis panon, kaj beninte, dispecigis ĝin kaj
donis al la disĉiploj, kaj diris: Prenu, manĝu; ĉi tio
estas mia korpo. 27 Kaj li prenis kalikon, kaj doninte
dankon, donis al ili, dirante: Vi ĉiuj trinku el ĝi; 28
ĉar ĉi tio estas mia sango de la interligo, kiu estas
elverŝata por multaj, por la pardonado de pekoj. 29
Sed mi diras al vi: De nun mi ne trinkos el ĉi tiu frukto
de la vinberarbo, ĝis tiu tago, kiam mi trinkos ĝin
novan kun vi en la regno de mia Patro. 30 Kaj kantinte
himnon, ili foriris al la monto Olivarba. 31 Tiam diris
Jesuo al ili: Vi ĉiuj ofendiĝos pro mi dum ĉi tiu nokto;
ĉar estas skribite: Mi frapos la paŝtiston, kaj la ŝafoj de
la grego diskuros. 32 Tamen, post mia releviĝo mi iros
antaŭ vi en Galileon. 33 Sed Petro responde diris al li:
Eĉ se ĉiuj ofendiĝos pro vi, mi neniam ofendiĝos. 34
Jesuo diris al li: Vere mi diras al vi, ke en ĉi tiu nokto,
antaŭ ol krios koko, vi trifoje malkonfesos min. 35
Petro diris al li: Eĉ se mi devos morti kun vi, mi neniel
vin malkonfesos. Tiel same diris ĉiuj disĉiploj. 36 Tiam
venis Jesuo kun ili al loko nomata Getsemane, kaj
diris al siaj disĉiploj: Sidiĝu ĉi tie, dum mi iros tien,
por preĝi. 37 Kaj li prenis kun si Petron kaj la du filojn
de Zebedeo, kaj komencis malĝoji kaj maltrankviliĝi.
38 Tiam li diris al ili: Tre malĝoja estas mia animo, eĉ
ĝis morto; restu ĉi tie, kaj viglu kun mi. 39 Kaj irinte
iom antaŭen, li falis sur sian vizaĝon, preĝante, kaj
dirante: Ho mia Patro, se povas esti, ĉi tiu kaliko pasu
for de mi; tamen ne kiel mi volas, sed kiel Vi volas. 40
Kaj li venis al la disĉiploj kaj trovis ilin dormantaj, kaj
diris al Petro: Ĉu vi do ne havis forton vigli kun mi eĉ
unu horon? 41 Viglu kaj preĝu, por ke vi ne eniru en
tenton; la spirito ja estas fervora, sed la karno estas
malforta. 42 Denove la duan fojon foririnte, li preĝis,
dirante: Ho mia Patro, se ĉi tio ne povos forpasi, krom
se mi trinkos ĝin, Via volo plenumiĝu. 43 Kaj denove
reveninte, li trovis ilin dormantaj, ĉar iliaj okuloj
peziĝis. 44 Kaj li denove lasis ilin kaj foriris, kaj la
trian fojon preĝis, denove dirante la samajn vortojn.
45 Tiam li venis al la disĉiploj, kaj diris al ili: Dormu
nun kaj ripozu: jen la horo alproksimiĝis, kaj la Filo
de homo estas perfidata en la manojn de pekuloj. 46
Leviĝu, ni iru; jen mia perfidanto alproksimiĝas. 47
Kaj dum li ankoraŭ parolis, jen venis Judas, unu el
la dek du; kaj kun li granda homamaso kun glavoj
kaj bastonoj venis de la ĉefpastroj kaj pliaĝuloj de
la popolo. 48 Kaj lia perfidanto jam aranĝis kun ili
signon, dirante: Kiun mi kisos, tiu estas li; kaptu lin.
49 Kaj tuj veninte al Jesuo, li diris: Saluton, Rabeno;
kaj kisis lin. 50 Kaj Jesuo diris al li: Amiko, por kio vi
venis? Tiam ili venis, kaj metis manojn sur Jesuon
kaj arestis lin. 51 Kaj jen unu el tiuj, kiuj estis kun
Jesuo, etendis sian manon kaj eltiris sian glavon, kaj
frapis la sklavon de la ĉefpastro, kaj detranĉis lian
orelon. 52 Tiam diris Jesuo al li: Remetu vian glavon
en ĝian ingon; ĉar ĉiuj, kiuj glavon prenas, per glavo
pereos. 53 Ĉu vi do supozas, ke mi ne povas alvoki
mian Patron, kaj Li tuj liveros al mi pli ol dek du
legiojn da anĝeloj? 54 Sed kiel plenumiĝus la Skriboj,
ke tiel devas okazi? 55 En tiu horo Jesuo diris al la
homamasoj: Ĉu vi elvenis kvazaŭ kontraŭ rabiston,
kun glavoj kaj bastonoj, por kapti min? Ĉiutage mi
sidis en la templo, instruante, kaj vi ne arestis min. 56
Sed ĉio tio okazis, por ke plenumiĝu la Skriboj de la
profetoj. Tiam ĉiuj disĉiploj forlasis lin kaj forkuris. 57
Kaj la arestintoj de Jesuo forkondukis lin al la domo

de la ĉefpastro Kajafas, kie jam kolektiĝis la skribistoj
kaj pliaĝuloj. 58 Sed Petro malproksime sekvis lin ĝis
la korto de la ĉefpastro, kaj eniris, kaj sidis kun la
subuloj, por vidi la finon. 59 Kaj la ĉefpastroj kaj la
tuta sinedrio serĉis malveran ateston kontraŭ Jesuo,
por ke ili povu lin mortigi; 60 kaj ne trovis, kvankam
multaj malveraj atestantoj venis. Sed poste venis du,
kaj diris: 61 Ĉi tiu diris: Mi povas detrui la sanktejon
de Dio, kaj rekonstrui ĝin en la daŭro de tri tagoj. 62
Kaj la ĉefpastro stariĝis, kaj diris al li: Ĉu vi respondas
nenion? kion atestas ĉi tiuj kontraŭ vi? 63 Sed Jesuo
silentadis. Kaj la ĉefpastro diris al li: Mi ĵurligas vin
per Dio la vivanta, ke vi diru al ni, ĉu vi estas la Kristo,
la Filo de Dio. 64 Jesuo diris al li: Vi diris; tamen mi
diras al vi: Poste vi vidos la Filon de homo, sidantan
ĉe la dekstra mano de la Potenco, kaj venantan sur la
nuboj de la ĉielo. 65 Tiam la ĉefpastro disŝiris siajn
vestojn, dirante: Li blasfemis; por kio ni plu bezonas
atestantojn? jen nun vi aŭdis la blasfemon: 66 kion vi
opinias? Ili respondis kaj diris: Li estas kondamninda
al morto. 67 Tiam oni kraĉis sur lian vizaĝon kaj
vangofrapis lin, kaj iuj frapis lin per la manplatoj, 68
dirante: Profetu al ni, ho Kristo, kiu vin frapis? 69
Kaj Petro sidis ekstere sur la korto; kaj venis al li
unu servantino, dirante: Vi ankaŭ estis kun Jesuo, la
Galileano. 70 Sed li malkonfesis antaŭ ili ĉiuj, dirante:
Mi ne scias, kion vi diras. 71 Kaj post kiam li eliris en
la vestiblon, alia vidis lin, kaj diris al la ĉeestantoj:
Ĉi tiu estis ankaŭ kun Jesuo, la Nazaretano. 72 Kaj
denove li malkonfesis kun ĵuro: Mi ne konas tiun
homon. 73 Kaj post iom da tempo la apudstarantoj
venis, kaj diris al Petro: Vere vi ankaŭ estas el ili, ĉar
via parolmaniero malkaŝas vin. 74 Tiam li komencis
malbeni kaj ĵuri: Mi ne konas tiun homon. Kaj tuj koko
kriis. 75 Kaj Petro rememoris la vorton, kiun Jesuo
parolis: Antaŭ ol krios koko, vi trifoje malkonfesos
min. Kaj li eliris, kaj maldolĉe ploris.

**27** Kaj kiam venis la mateno, ĉiuj ĉefpastroj kaj
pliaĝuloj de la popolo konsiliĝis kontraŭ Jesuo,
por mortigi lin; 2 kaj ili ligis lin, kaj forkondukis lin
kaj transdonis lin al Pilato, la provincestro. 3 Tiam
Judas, lia perfidinto, vidinte, ke li estas kondamnita,
pentis, kaj reportis la tridek arĝentajn monerojn al
la ĉefpastroj kaj la pliaĝuloj, 4 dirante: Mi pekis,
perfidante senkulpan sangon. Sed ili diris: Kiel tio
koncernas nin? vi zorgu pri tio. 5 Kaj li ĵetis la
arĝentajn monerojn en la sanktejon, kaj eliris; kaj
foririnte, pendigis sin. 6 Kaj la ĉefpastroj prenis la
arĝentajn monerojn, kaj diris: Ne konvenas meti ilin
en la trezorejon, ĉar tio estas prezo de sango. 7
Kaj ili konsiliĝis, kaj aĉetis per ili la kampon de la
potisto, por enterigi fremdulojn. 8 Tial tiu kampo
estas nomata Kampo de Sango, ankoraŭ ĝis hodiaŭ. 9
Tiam plenumiĝis tio, kio estis dirita per la profeto
Jeremia, nome: Kaj ili prenis la tridek arĝentajn
monerojn, taksoprezon de tiu, kiu estis taksita, kiujn
iuj el la filoj de Izrael taksis; 10 kaj donis ilin por la
kampo de la potisto, kiel la Eternulo difinis al mi. 11
Kaj Jesuo staris antaŭ la provincestro; kaj la estro
demandis lin, dirante: Ĉu vi estas la Reĝo de la Judoj?
Kaj Jesuo diris al li: Vi diras. 12 Kaj kiam la ĉefpastroj
kaj pliaĝuloj akuzis lin, li respondis nenion. 13 Tiam
Pilato diris al li: Ĉu vi ne aŭdas, kiom da aferoj oni
atestas kontraŭ vi? 14 Kaj li ne respondis al li eĉ
unu vorton, tiel ke la provincestro tre forte miris.
15 Sed ĉe tiu festo la provincestro kutimis liberigi
al la homamaso unu malliberulon, kiun ili deziris.
16 Kaj oni havis tiam faman malliberulon, nomatan
Barabas. 17 Kiam do ili kolektiĝis, Pilato diris al ili:
Kiun vi deziras, ke mi liberigu al vi? ĉu Barabason,
aŭ Jesuon, nomatan Kristo? 18 Ĉar li sciis, ke pro
envio ili transdonis lin. 19 Kaj dum li sidis sur la
tribunala seĝo, lia edzino sendis al li, por diri: Nenion
havu kun tiu justulo, ĉar mi suferis multe hodiaŭ en
sonĝo kaŭze de li. 20 Kaj la ĉefpastroj kaj pliaĝuloj
decidigis la homamason postuli Barabason kaj pereigi
Jesuon. 21 Sed la provincestro responde diris al ili:
Kiun el la du vi volas, ke mi liberigu al vi? Kaj ili diris:
Barabason. 22 Pilato diris al ili: Kion do mi faros al
Jesuo, nomata Kristo? Ĉiuj diris: Li estu krucumita. 23
Kaj li diris: Kial? kian malbonon li faris? Sed ili des
pli ekkriis, dirante: Li estu krucumita. 24 Tial Pilato,
vidante, ke neniel prosperas al li, sed ke kontraŭe
tumulto leviĝas, prenis akvon kaj lavis siajn manojn
antaŭ la homamaso, dirante: Mi estas senkulpa pri
la sango de tiu justulo: vi zorgu pri ĝi. 25 Kaj la tuta
popolo responde diris: Lia sango estu sur ni kaj sur
niaj infanoj. 26 Tiam li liberigis al ili Barabason; sed
skurĝinte Jesuon, li transdonis lin, por esti krucumita.
27 Tiam la soldatoj de la provincestro, kondukinte
Jesuon en la palacon, kolektis al li la tutan kohorton.
28 Kaj ili senvestigis lin, kaj surmetis al li skarlatan
mantelon. 29 Kaj ili plektis kronon el dornoj kaj metis

ĝin sur lian kapon, kaj metis kanon en lian dekstran
manon; kaj ili genuis antaŭ li, kaj mokis lin, dirante:
Saluton, Reĝo de la Judoj! 30 Kaj ili kraĉis sur lin, kaj
prenis la kanon kaj frapis lian kapon. 31 Kaj mokinte
lin, ili demetis de li la mantelon, kaj surmetis al li liajn
proprajn vestojn, kaj forkondukis lin, por krucumi lin.
32 Kaj elirinte, ili trovis viron Kirenanon, nomatan
Simon; tiun ili devigis, ke li portu lian krucon. 33
Kaj veninte al loko nomata Golgota, tio estas, Loko
de Kranio, 34 ili donis al li trinki vinon kun galo
enmiksita; kaj li gustumis ĝin, kaj ne volis trinki. 35
Kaj krucuminte lin, ili dividis inter si liajn vestojn,
ĵetante lotojn; 36 kaj ili sidiĝis, kaj gardis lin tie. 37
Kaj ili metis super lia kapo lian akuzon, skribitan: ĈI
TIU ESTAS JESUO, LA REĜO DE LA JUDOJ. 38 Tiam
kun li estis krucumitaj du rabistoj, unu dekstre kaj
unu maldekstre. 39 Kaj la preterpasantoj insultis lin,
balancante la kapon, 40 kaj dirante: Vi, kiu detruas
la sanktejon kaj rekonstruas ĝin en la daŭro de tri
tagoj, savu vin. Se vi estas la Filo de Dio, deiru de
la kruco. 41 Tiel same ankaŭ la ĉefpastroj, mokante
kun la skribistoj kaj la pliaĝuloj, diris: 42 Aliajn li
savis; sin mem li ne povas savi. Li ja estas Reĝo de
Izrael, li nun deiru de la kruco, kaj ni kredos al li.
43 Li apogis sin al Dio; Tiu savu lin, se Li amas lin;
ĉar li diris: Mi estas la Filo de Dio. 44 Kaj ankaŭ la
rabistoj, kiuj estis krucumitaj kun li, tiel same insultis
lin. 45 Kaj de post la sesa horo fariĝis mallumo sur
la tuta lando ĝis la naŭa horo. 46 Kaj ĉirkaŭ la naŭa
horo Jesuo ekkriis per laŭta voĉo, dirante: Eli, Eli,
lama sabaĥtani? tio estas: Mia Dio, mia Dio, kial Vi
forlasis min? 47 Kaj iuj el la apudstarantoj, aŭdinte
tion, diris: Ĉi tiu vokas Elijan. 48 Kaj tuj unu el ili kuris
kaj prenis spongon kaj plenigis ĝin per vinagro, kaj
metinte ĝin sur kanon, donis al li trinki. 49 Kaj la aliaj
diris: Lasu; ni vidu, ĉu venos Elija, por savi lin. 50 Kaj
Jesuo, denove kriinte per laŭta voĉo, ellasis for la
spiriton. 51 Kaj jen la kurteno de la sanktejo disŝiriĝis
en du pecojn de supre ĝis malsupre; kaj la tero tremis;
kaj la rokoj diskrevis; 52 kaj la tomboj malfermiĝis,
kaj multaj korpoj de dormantaj sanktuloj leviĝis, 53
kaj elirinte el la tomboj post lia releviĝo, ili eniris
en la sanktan urbon kaj aperis al multaj. 54 Kaj la
centestro, kaj tiuj, kiuj estis kun li gardantaj Jesuon,
kiam ili vidis la tertremon kaj la okazantaĵojn, tre
timis, dirante: Vere ĉi tiu estis Filo de Dio. 55 Kaj tie
estis multaj virinoj, rigardantaj de malproksime, kiuj
sekvis Jesuon el Galileo, servante al li; 56 inter kiuj
estis Maria Magdalena, kaj Maria, la patrino de Jakobo
kaj de Joses, kaj la patrino de la filoj de Zebedeo. 57
Kaj kiam vesperiĝis, venis riĉulo, nomata Jozef, el
Arimateo, kiu mem estis disĉiplo de Jesuo: 58 tiu,
irinte al Pilato, petis la korpon de Jesuo. Tiam Pilato
ordonis doni ĝin. 59 Kaj Jozef prenis la korpon, kaj
envolvis ĝin en pura tolaĵo, 60 kaj metis ĝin en sian
novan tombon, kiun li jam elhakis en la roko; kaj li
alrulis grandan ŝtonon al la enirejo de la tombo, kaj
foriris. 61 Kaj Maria Magdalena estis tie, kaj la alia
Maria, sidantaj apud la tombo. 62 La sekvantan tagon,
kiu estas la tago post la Preparado, la ĉefpastroj kaj
la Fariseoj kolektiĝis al Pilato, 63 dirante: Sinjoro, ni
ekrememoras, ke tiu trompanto diris, dum li ankoraŭ
vivis: Post tri tagoj mi releviĝos. 64 Ordonu do, ke oni
gardu la tombon ĝis la tria tago, por ke liaj disĉiploj
ne venu kaj ne forŝtelu lin kaj ne diru al la popolo:
Li releviĝis el la mortintoj; kaj la lasta trompo estus
pli malbona, ol la unua. 65 Pilato diris al ili: Vi havas
gardistaron; iru, kaj gardu ĝin laŭ via eblo. 66 Tial ili
foriris kaj gardis la tombon, sigelinte la ŝtonon, kune
kun gardistaro.

28 Kaj sabate malfrue, kiam eklumis por la unua
tago de la semajno, venis Maria Magdalena kaj la
alia Maria, por vidi la tombon. 2 Kaj jen okazis granda
tertremo; ĉar anĝelo de la Eternulo malsupreniris el
la ĉielo, kaj venis kaj derulis la ŝtonon, kaj sidiĝis
sur ĝi. 3 Lia aspekto estis kiel fulmo, kaj lia vestaĵo
estis blanka, kiel neĝo; 4 kaj pro timo al li la gardistoj
tremis, kaj fariĝis kiel malvivuloj. 5 Kaj la anĝelo
responde diris al la virinoj: Ne timu; ĉar mi scias, ke
vi serĉas Jesuon, la krucumitan. 6 Li ne estas ĉi tie;
ĉar li leviĝis, kiel li diris. Venu, vidu la lokon, kie la
Sinjoro kuŝis. 7 Kaj iru rapide, kaj diru al liaj disĉiploj:
Li leviĝis el la mortintoj, kaj jen li iras antaŭ vi en
Galileon; tie vi vidos lin; jen mi sciigis al vi. 8 Kaj
ili rapide foriris de la tombo kun timo kaj granda
ĝojo, kaj kuris, por sciigi al liaj disĉiploj. 9 Kaj jen
Jesuo renkontis ilin, dirante: Saluton. Kaj alveninte, ili
ekprenis liajn piedojn kaj adorkliniĝis al li. 10 Tiam
Jesuo diris al ili: Ne timu; iru, diru al miaj fratoj, ke ili
foriru en Galileon, kaj tie ili min vidos. 11 Kaj dum ili
iris, iuj el la gardistoj venis en la urbon, kaj rakontis
al la ĉefpastroj ĉiujn okazintaĵojn. 12 Kaj kunveninte
kun la pliaĝuloj, ili konsiliĝis kune, kaj ili donis al la

soldatoj multe da mono, 13 dirante: Diru: Liaj disĉiploj
venis nokte, kaj forŝtelis lin, dum ni dormis. 14 Kaj
se la provincestro tion aŭdos, ni konvinkos lin, kaj
liberigos vin de ĉia zorgo. 15 Kaj ili prenis la monon,
kaj faris, kiel ili estis instruitaj; kaj tiu diro disvastiĝis
inter la Judoj ĝis hodiaŭ. 16 Sed la dek unu disĉiploj
iris en Galileon, sur la monton, kiun Jesuo jam difinis
al ili. 17 Kaj kiam ili vidis lin, ili adorkliniĝis al li; sed
kelkaj dubis. 18 Kaj Jesuo venis al ili, kaj diris al ili:
Estas donita al mi ĉia aŭtoritato en la ĉielo kaj sur la
tero. 19 Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn, baptante
ilin en la nomon de la Patro kaj de la Filo kaj de la
Sankta Spirito; 20 instruante ilin observi ĉion, kion mi
ordonis al vi. Kaj jen mi estas kun vi ĉiujn tagojn, ĝis
la maturiĝo de la mondaĝo. (aiōn g165)

# Marko

1 La komenco de la evangelio de Jesuo Kristo, Filo de
Dio. 2 Kiel estas skribite en la profeto Jesaja: Jen Mi
sendas Mian anĝelon antaŭ via vizaĝo, Kaj li preparos
vian vojon; 3 Voĉo de krianto en la dezerto: Pretigu la
vojon de la Eternulo, Rektigu Liajn irejojn; 4 venis
Johano, kiu baptis en la dezerto kaj predikis la bapton
de pento por la pardonado de pekoj. 5 Kaj eliris al li la
tuta Juduja distrikto, kaj ĉiuj Jerusalemanoj; kaj ili
estis baptitaj de li en la rivero Jordan, konfesante siajn
pekojn. 6 Kaj Johano estis vestita per kamelharaĵo kaj
leda zono ĉirkaŭ siaj lumboj, kaj li manĝadis akridojn
kaj sovaĝan mielon. 7 Kaj li predikis, dirante: Venas
post mi tiu, kiu estas pli potenca ol mi; la rimenon
de liaj ŝuoj mi ne estas inda, kliniĝinte, malligi. 8 Mi
vin baptis per akvo; sed li vin baptos per la Sankta
Spirito. 9 Kaj en tiuj tagoj Jesuo venis el Nazaret de
Galileo, kaj estis baptita de Johano en Jordan. 10 Kaj
tuj kiam li eliris el la akvo, li vidis la ĉielon fenditan,
kaj la Spiriton kiel kolombo malsuprenirantan sur lin;
11 kaj venis voĉo el la ĉielo: Vi estas Mia Filo, la amata,
en kiu Mi havas plezuron. 12 Kaj tuj la Spirito pelis lin
for en la dezerton. 13 Kaj li estis en la dezerto kvardek
tagojn, tentata de Satano; kaj li estis kun la sovaĝaj
bestoj, kaj la anĝeloj servadis al li. 14 Kaj post kiam
Johano estis arestita, Jesuo iris en Galileon, predikante
la evangelion de Dio, 15 kaj dirante: La tempo jam
plenumiĝis, kaj la regno de Dio alproksimiĝis; pentu,
kaj kredu al la evangelio. 16 Kaj irante apud la Galilea
Maro, li vidis Simonon, kaj Andreon, fraton de Simon,
ĵetantajn reton en la maron; ĉar ili estis fiŝkaptistoj.
17 Kaj Jesuo diris al ili: Venu post mi, kaj mi igos
vin fariĝi kaptistoj de homoj. 18 Kaj ili tuj forlasis la
retojn, kaj sekvis lin. 19 Kaj irinte iom antaŭen, li vidis
Jakobon, filon de Zebedeo, kaj Johanon, lian fraton,
kiuj ankaŭ estis en la ŝipeto, riparante la retojn. 20
Kaj tuj li alvokis ilin; kaj ili lasis sian patron Zebedeo
en la ŝipeto kun la dungitoj, kaj foriris post li. 21 Kaj
ili iris en Kapernaumon, kaj tuj en la sabato li eniris
en la sinagogon kaj instruis. 22 Kaj oni miris pro lia
instruado; ĉar li instruis kiel havanta aŭtoritaton,
kaj ne kiel la skribistoj. 23 Kaj en ilia sinagogo estis
viro kun malpura spirito; kaj li ekkriis, 24 dirante: Kio
estas inter ni kaj vi, Jesuo Nazaretano? ĉu vi venis,
por pereigi nin? mi scias, kiu vi estas: la Sanktulo de
Dio. 25 Kaj Jesuo severe admonis lin, dirante: Silentu,
kaj eliru el li. 26 Kaj la malpura spirito konvulsiigis
lin, kaj, laŭte kriinte, eliris el li. 27 Kaj ĉiuj miregis
tiom, ke ili diskutis inter si, dirante: Kio estas ĉi tio?
jen nova instruado! kun aŭtoritato li ordonas eĉ al la
malpuraj spiritoj, kaj ili obeas lin. 28 Kaj tuj la famo
pri li disvastiĝis ĉie en la tutan ĉirkaŭaĵon de Galileo.
29 Kaj tuj, elirinte el la sinagogo, ili eniris en la domon
de Simon kaj Andreo, kun Jakobo kaj Johano. 30 Sed la
bopatrino de Simon kuŝis malsana de febro; kaj tuj oni
sciigis al li pri ŝi; 31 kaj veninte, li prenis ŝian manon
kaj levis ŝin; kaj la febro forlasis ŝin, kaj ŝi servis al ili.
32 Kaj vespere, kiam la suno subiris, oni venigis al li
ĉiujn, kiuj estis malsanaj kaj demonhavantaj. 33 Kaj
la tuta urbo kolektiĝis ĉe la pordo. 34 Kaj li sanigis
multajn, kiuj malsanis de diversaj malsanoj, kaj elpelis
multajn demonojn; kaj li ne permesis al la demonoj
paroli, ĉar ili konis lin. 35 Kaj matene, antaŭ ol la
nokto pasis, li leviĝis, kaj foriris en dezertan lokon,
kaj tie preĝadis. 36 Kaj Simon kaj liaj kunuloj elserĉis
lin; 37 kaj ili trovis lin, kaj diris al li: Ĉiuj vin serĉas.
38 Kaj li diris al ili: Ni iru aliloken en la proksimajn
urbetojn, por ke mi tie ankaŭ prediku; ĉar por tio mi
venis. 39 Kaj li iris, predikante en iliaj sinagogoj tra la
tuta Galileo, kaj elpelante la demonojn. 40 Kaj venis al
li leprulo, alvokante lin, kaj genuinte, li diris al li: Se
vi nur volas, vi povas min purigi. 41 Kaj kortuŝite,
li etendis la manon kaj tuŝis lin, kaj diris al li: Mi
volas; estu purigita. 42 Kaj tuj la lepro foriris de li,
kaj li fariĝis pura. 43 Kaj severe avertinte lin, li tuj
forsendis lin, 44 kaj diris al li: Zorgu, ke vi diru nenion
al iu; sed iru, montru vin al la pastro, kaj oferu pro
via purigado tion, kion Moseo ordonis, por atesto al
ili. 45 Sed li eliris, kaj komencis diligente rakonti kaj
disfamigi la aferon, tiel ke Jesuo jam ne povis malkaŝe
eniri en urbon, sed restis ekstere en dezertaj lokoj;
kaj oni venis al li el ĉie.

2 Kaj kiam li revenis en Kapernaumon post kelke
da tagoj, oni sciiĝis, ke li estas en domo. 2 Kaj
multaj kunvenis, tiel ke jam ne estis loko eĉ apud la
pordo; kaj li parolis al ili la vorton. 3 Kaj oni venis,
alportante al li paralizulon, portatan de kvar homoj.
4 Kaj ne povante alproksimiĝi al li pro la homamaso,
ili malkovris la tegmenton, kie li estis; kaj trafosinte
ĝin, ili mallevis la liton, sur kiu kuŝis la paralizulo. 5
Kaj Jesuo, vidante ilian fidon, diris al la paralizulo:
Filo, viaj pekoj estas pardonitaj. 6 Sed estis iuj el la

skribistoj tie, sidantaj kaj diskutantaj en siaj koroj: 7
Kial tiu tiel parolas? li blasfemas: kiu povas pardoni
pekojn, krom Dio sola? 8 Kaj Jesuo, tuj eksciante en
sia spirito, ke tiel ili diskutas en si, diris al ili: Kial
vi tion diskutas en viaj koroj? 9 Kio estas pli facila:
diri al la paralizulo: Viaj pekoj estas pardonitaj; aŭ
diri: Leviĝu, prenu vian liton, kaj piediru? 10 Sed por
ke vi sciu, ke la Filo de homo havas aŭtoritaton sur
la tero pardoni pekojn — li diris al la paralizulo: 11
Mi diras al vi: Leviĝu, prenu vian liton, kaj iru al via
domo. 12 Kaj li leviĝis, kaj tuj prenis la liton, kaj eliris
antaŭ ĉiuj, tiel ke ĉiuj miregis, kaj gloris Dion, dirante:
Neniam ni vidis ion tian. 13 Kaj denove li eliris al
la marbordo, kaj la tuta homamaso venis al li, kaj
li instruis ilin. 14 Kaj preterpasante, li vidis Levin,
filon de Alfeo, sidantan ĉe la impostejo, kaj li diris al
li: Sekvu min. Kaj li stariĝis, kaj sekvis lin. 15 Kaj li
sidis ĉe manĝo en lia domo, kaj multaj impostistoj kaj
pekuloj kunsidis kun Jesuo kaj liaj disĉiploj; ĉar ili
estis multaj, kaj ili sekvis lin. 16 Kaj la skribistoj kaj la
Fariseoj, vidante, ke li manĝas kun la pekuloj kaj la
impostistoj, diris al liaj disĉiploj: Li manĝas kaj trinkas
kun impostistoj kaj pekuloj. 17 Kaj aŭdinte tion, Jesuo
diris al ili: Ne la sanuloj bezonas kuraciston, sed la
malsanuloj: mi venis, por alvoki ne justulojn, sed
pekulojn. 18 Kaj la disĉiploj de Johano kaj la Fariseoj
estis fastantaj, kaj oni venis, kaj diris al li: Kial fastas
la disĉiploj de Johano kaj de la Fariseoj, sed viaj ne
fastas? 19 Kaj Jesuo diris al ili: Ĉu la filoj de la edziĝejo
povas fasti, dum la fianĉo estas kun ili? Tiel longe,
kiel ili havas kun si la fianĉon, ili ne povas fasti. 20 Sed
venos tagoj, kiam la fianĉo estos prenita for de ili, kaj
tiam ili fastos en tiuj tagoj. 21 Neniu alkudras flikaĵon
el nefulita drapo sur malnovan veston; alie la nova
plenigaĵo ion forprenas de la malnova ŝtofo, kaj pli
malbona ŝiraĵo fariĝas. 22 Kaj neniu enverŝas novan
vinon en malnovajn felsakojn; alie la vino krevigos la
felsakojn, kaj la vino elfluos kaj la felsakoj detruiĝos;
sed oni enverŝas novan vinon en novajn felsakojn. 23
Kaj en sabato li iris tra la grenkampoj, kaj liaj disĉiploj
komencis dum la vojiro deŝiri la spikojn. 24 Kaj la
Fariseoj diris al li: Jen kial ili en la sabato faras tion,
kio ne estas permesata? 25 Kaj li diris al ili: Ĉu vi
neniam legis, kion faris David, kiam li havis bezonon
kaj malsatis, li kaj liaj kunuloj? 26 Ke li eniris en
la domon de Dio, kiam Ebjatar estis ĉefpastro, kaj
manĝis la panojn de propono, kiujn manĝi ne estas
permesate krom al la pastroj, kaj donis ankaŭ al siaj
kunuloj? 27 Kaj li diris al ili: La sabato estiĝis por la
homo, kaj ne la homo por la sabato; 28 tial la Filo de
homo estas sinjoro eĉ de la sabato.

**3** Kaj denove li eniris en la sinagogon, kaj tie estis
viro, havanta manon velkintan. 2 Kaj oni observis
lin, ĉu en la sabato li lin sanigos, por ke ili povu lin
akuzi. 3 Kaj li diris al la viro, kiu havis la velkintan
manon: Stariĝu en la mezo. 4 Kaj li diris al ili: Ĉu
estas permesate bonfari en sabato, aŭ malbonfari?
savi vivon, aŭ mortigi? Sed ili silentis. 5 Kaj kiam kun
kolero li ĉirkaŭrigardis ilin, ĉagrenite pro la obstiniĝo
de ilia koro, li diris al la viro: Etendu vian manon. Kaj
li etendis ĝin, kaj lia mano resaniĝis. 6 Kaj la Fariseoj
eliris, kaj tuj konsiliĝis kun la Herodanoj kontraŭ li,
kiamaniere lin pereigi. 7 Kaj Jesuo kun siaj disĉiploj
foriris ĝis la maro; kaj granda homamaso el Galileo
sekvis lin. Kaj el Judujo 8 kaj el Jerusalem kaj el
Edom kaj el Transjordano kaj el ĉirkaŭ Tiro kaj Cidon,
grandnombra homamaso, aŭdinte ĉion, kion li faris,
venis al li. 9 Kaj li diris al siaj disĉiploj, ke malgranda
ŝipeto estu je lia dispono, pro la homamaso, por ke
oni ne premu lin; 10 ĉar multajn li jam sanigis, tiel
ke ĉiuj, kiuj havis malsanojn, premadis sur lin, por
tuŝi lin. 11 Kaj malpuraj spiritoj, tuj kiam ili vidis lin,
falis antaŭ li, kaj kriis, dirante: Vi estas la Filo de Dio.
12 Kaj li severe admonis ilin, ke ili ne konatigu lin.
13 Kaj li supreniris sur la monton, kaj alvokis tiujn,
kiujn li mem volis; kaj ili venis al li. 14 Kaj li elektis
dek du, kiujn ankaŭ li nomis apostoloj, por ke ili estu
kun li, kaj por ke li dissendu ilin por prediki, 15 kaj
por havi aŭtoritaton elpeli demonojn: 16 kaj Simonon
li alnomis Petro; 17 kaj Jakobon, filon de Zebedeo,
kaj Johanon, fraton de Jakobo, kaj tiujn li alnomis
Boanerges, tio estas, Filoj de tondro; 18 kaj Andreon
kaj Filipon kaj Bartolomeon kaj Mateon kaj Tomason,
kaj Jakobon, filon de Alfeo, kaj Tadeon, kaj Simonon,
la Fervorulon, 19 kaj Judason Iskariotan, kiu ankaŭ
perfidis lin. Kaj li venis en domon. 20 Kaj denove la
homamaso kunvenis tiel, ke ili ne povis eĉ manĝi
panon. 21 Kaj liaj amikoj, aŭdinte tion, eliris, por kapti
lin, ĉar ili diris: Li frenezas. 22 Kaj la skribistoj, kiuj
alvenis el Jerusalem, diris: Li havas Baal-Zebubon; per
la estro de la demonoj li elpelas la demonojn. 23 Kaj
li alvokis ilin, kaj parolis al ili parabole: Kiel povas
Satano elpeli Satanon? 24 Kaj se regno estas dividita

kontraŭ si, tiu regno ne povas stari. 25 Kaj se domo
estas dividita kontraŭ si, tiu domo ne povas stari. 26
Kaj se Satano ribelis kontraŭ si kaj estas dividita, li ne
povas stari, sed havas finon. 27 Sed neniu povas eniri
en la domon de la fortulo kaj trarabi liajn posedaĵojn,
se unue li ne ligos la fortulon, kaj poste li trarabos
lian domon. 28 Vere mi diras al vi: Ĉiuj iliaj pekoj estos
pardonitaj al la filoj de homoj, kaj iliaj blasfemoj, per
kiuj ajn ili blasfemos; 29 sed iu, kiu blasfemos kontraŭ
la Sankta Spirito, eterne ne havos pardonon, sed estas
kulpa pri eterna peko; (aiōn g165, aiōnios g166) 30 ĉar oni
diris: Li havas malpuran spiriton. 31 Kaj jen alvenis lia
patrino kaj liaj fratoj, kaj starante ekstere, ili sendis al
li, vokante lin. 32 Kaj homamaso sidis ĉirkaŭ li; kaj oni
diris al li: Jen via patrino kaj viaj fratoj ekstere vin
serĉas. 33 Kaj li respondis al ili, dirante: Kiuj estas mia
patrino kaj miaj fratoj? 34 Kaj ĉirkaŭrigardante tiujn,
kiuj ronde ĉirkaŭ li sidis, li diris: Jen mia patrino kaj
miaj fratoj! 35 Ĉar kiu ajn faros la volon de Dio, tiu
estas mia frato kaj mia fratino kaj mia patrino.

4 Kaj denove li komencis instrui apud la maro. Kaj
kolektiĝis al li tre granda homamaso tiel, ke li
eniris en ŝipeton, kaj sidis sur la maro; kaj la tuta
homamaso estis sur la tero apud la maro. 2 Kaj li
multe instruis ilin per paraboloj, kaj diris al ili en sia
instruado: 3 Aŭskultu: jen semisto eliris, por semi; 4
kaj dum li semis, iuj semoj falis apud la vojo, kaj la
birdoj venis kaj formanĝis ilin. 5 Kaj aliaj falis sur
ŝtonan lokon, kie ili ne havis multe da tero; kaj tuj
ili ekkreskis, ĉar ili ne havis profundecon de tero;
6 kaj kiam la suno leviĝis, ili brulsekiĝis, kaj ĉar ili
ne havis radikon, ili forvelkis. 7 Kaj aliaj falis inter
dornojn, kaj la dornoj kreskis kaj sufokis ilin, kaj ili
ne donis frukton. 8 Kaj aliaj falis en la bonan teron,
kaj donis frukton, kreskante kaj multobliĝante, kaj
produktis tridekoble kaj sesdekoble kaj centoble. 9
Kaj li diris: Kiu havas orelojn por aŭdi, tiu aŭdu. 10
Kaj kiam li estis sola, tiuj, kiuj alestis kune kun la
dek du, demandis lin pri la paraboloj. 11 Kaj li diris
al ili: Al vi estas donite scii la misteron de la regno
de Dio; sed al tiuj, kiuj estas ekstere, ĉio estas farata
per paraboloj; 12 por ke, vidante, ili vidu, sed ne
rimarku; kaj aŭdante, ili aŭdu, sed ne komprenu;
por ke neniam ili konvertiĝu kaj pardoniĝu. 13 Kaj li
diris al ili: Ĉu vi ne scias ĉi tiun parabolon? kiel do
vi povos kompreni ĉiujn parabolojn? 14 La semisto
semas la vorton. 15 Jen do tiuj, kiuj estas apud la
vojo, kie estas semata la vorto; kaj kiam ili aŭdis, tuj
venas Satano, kaj forprenas la vorton, en ili semitan.
16 Kaj tiel same jen la semitaj ĉe la ŝtonaj lokoj: ili
aŭdas la vorton, kaj tuj kun ĝojo akceptas ĝin; 17 kaj
ili ne havas en si radikon, sed restas nur portempe;
kiam do venas sufero aŭ persekuto pro la vorto, tuj ili
falpuŝiĝas. 18 Kaj jen la semitaj ĉe la dornoj: tiuj, kiuj
aŭdis la vorton; 19 sed la zorgoj de la mondo kaj la
trompo de riĉo kaj la deziroj al aliaj aferoj, enirante,
sufokas la vorton, kaj ĝi fariĝas senfrukta. (aiōn g165)
20 Kaj jen la semitaj ĉe la bona tero: tiuj, kiuj aŭdas
la vorton kaj akceptas ĝin, kaj donas frukton, jen
tridekoble, kaj jen sesdekoble, kaj jen centoble. 21
Kaj li diris al ili: Ĉu lampo enportiĝas, por esti metita
sub grenmezurilon aŭ sub liton, kaj ne por stari sur
la lampingo? 22 Ĉar nenio estas kaŝita krom por tio,
ke ĝi estu malkaŝita; nek io estas sekreta krom por
tio, ke ĝi estu aperigita. 23 Se iu havas orelojn por
aŭdi, tiu aŭdu. 24 Kaj li diris al ili: Atentu, kion vi
aŭdas; per kia mezuro vi mezuras, laŭ tiu sama oni
mezuros al vi, kaj eĉ faros al vi aldonon. 25 Ĉar al tiu,
kiu havas, estos donite; sed for de tiu, kiu ne havas,
estos prenita eĉ tio, kion li havas. 26 Kaj li diris: Tia
estas la regno de Dio, kvazaŭ homo ĵetus semojn sur
la teron, 27 kaj dormus kaj leviĝus nokte kaj tage,
kaj la semoj burĝonus kaj kreskus, li ne scias kiel. 28
Aŭtomate la tero donas frukton, unue folion, poste
spikon, poste plenan grenon en spiko. 29 Sed kiam la
frukto estas preta, li tuj svingas la rikoltilon, ĉar venis
la rikolto. 30 Kaj li diris: Al kio ni komparu la regnon
de Dio? aŭ per kia parabolo ni montru ĝin? 31 Al
sinapa semeto, kiu, kiam ĝi estas semita sur la teron,
estas pli malgranda ol ĉiuj aliaj semoj, kiuj estas sur la
tero, 32 tamen semite, kreskas kaj fariĝas pli granda
ol ĉiuj legomoj, kaj elmetas grandajn branĉojn, tiel ke
sub ĝia ombro povas ekloĝi la birdoj de la ĉielo. 33
Kaj per multaj tiaj paraboloj li parolis al ili la vorton
laŭ tio, kiel ili povis aŭskulti; 34 kaj sen parabolo li
ne parolis al ili; sed private li klarigis ĉion al siaj
disĉiploj. 35 Kaj en tiu tago, kiam vesperiĝis, li diris
al ili: Ni transiru al la alia bordo. 36 Kaj forsendinte
la homamason, ili kondukis lin kun si, kiel li estis
en la ŝipeto. Kaj aliaj ŝipetoj akompanis lin. 37 Kaj
okazis granda ventego, kaj ondoj batis en la ŝipeton,
tiel ke la ŝipeto estis jam pleniĝanta. 38 Kaj li estis
dormanta en la posta parto sur la kuseno; kaj ili vekis

lin, kaj diris al li: Majstro, ĉu vi ne zorgas pri tio, ke
ni pereas? 39 Kaj vekite, li admonis la venton, kaj
diris al la maro: Silentu, kvietiĝu. Kaj la vento ĉesiĝis,
kaj fariĝis granda sereno. 40 Kaj li diris al ili: Kial vi
estas timemaj? ĉu vi ankoraŭ ne havas fidon? 41 Kaj
ili timis treege, kaj diris unu al alia: Kiu do estas ĉi
tiu? ĉar eĉ la vento kaj la maro obeas al li.

**5** Kaj ili venis trans la maron en la landon de la
Gerasenoj. 2 Kaj kiam li elvenis el la ŝipeto, tuj lin
renkontis el la tomboj viro, havanta malpuran spiriton,
3 kiu havis loĝejon en la tomboj, kaj jam neniu povis
ligi lin eĉ per kateno; 4 ĉar li ofte estis ĉirkaŭligita per
katenoj kaj ĉenoj, kaj la ĉenoj estis disŝiritaj de li kaj
la katenoj frakasitaj; kaj neniu kapablis malsovaĝigi
lin. 5 Kaj ĉiam, nokte kaj tage, inter la tomboj kaj sur
la montoj, li kriadis kaj sin tranĉis per ŝtonoj. 6 Kaj,
vidinte Jesuon el malproksime, li kuris kaj adorkliniĝis
al li; 7 kaj kriante per laŭta voĉo, li diris: Kio estas
inter mi kaj vi, ho Jesuo, Filo de Dio Plejalta? Mi vin
ĵurpetas per Dio, ke vi ne turmentu min. 8 Ĉar li
diris al li: Eliru, ho malpura spirito, el la viro. 9 Kaj li
demandis lin: Kia estas via nomo? Kaj li respondis,
dirante: Mia nomo estas Legio, ĉar ni estas multaj.
10 Kaj li multe petegis, ke li ne forsendu ilin el la
lando. 11 Kaj estis tie sur la monto granda grego
da porkoj paŝtiĝantaj. 12 Kaj ili petegis lin, dirante:
Sendu nin en la porkojn, por ke ni eniru en ilin. 13
Kaj li permesis tion al ili. Kaj elirinte, la malpuraj
spiritoj eniris en la porkojn; kaj la grego kuris rapide
malsupren de la krutaĵo en la maron, ĉirkaŭ du miloj,
kaj sufokiĝis en la maro. 14 Kaj iliaj paŝtistoj forkuris,
kaj rakontis la aferon en la urbo kaj en la kamparo.
Kaj oni venis, por vidi, kio okazis. 15 Kaj ili venis
al Jesuo, kaj vidis la demonhavinton, kiu havis la
legion, sidanta, vestita kaj en sana prudento; kaj ili
timis. 16 Kaj la vidintoj rakontis al ili, kiamaniere tio
okazis al la demonhavinto, kaj pri la porkoj. 17 Kaj ili
komencis petegi lin, ke li foriru el iliaj limoj. 18 Kaj
kiam li eniris en la ŝipeton, la demonhavinto petegis
lin, ke li povu esti kun li. 19 Kaj li ne permesis al li,
sed diris al li: Iru al via domo, al la viaj, kaj rakontu
al ili ĉion, kion faris la Eternulo por vi, kaj kiel Li
kompatis vin. 20 Kaj li foriris, kaj komencis famigi en
Dekapolis ĉion, kion faris Jesuo por li; kaj ĉiuj miregis.
21 Kaj kiam Jesuo retransiris en la ŝipeto al la alia
bordo, granda homamaso kolektiĝis al li; kaj li estis
apud la maro. 22 Kaj venis unu el la sinagogestroj,
nomata Jairo, kaj ekvidinte lin, falis antaŭ liaj piedoj,
23 kaj insiste lin petegis, dirante: Mia filineto estas en
lasta ekstremo; venu do kaj metu viajn manojn sur
ŝin, por ke ŝi saviĝu kaj vivu. 24 Kaj li iris kun li, kaj
granda homamaso sekvis lin kaj premis lin. 25 Kaj
virino, kiu jam dek du jarojn havis sangofluon, 26 kaj
multe suferis pro multaj kuracistoj, kaj elspezis sian
tutan havon, kaj estis neniel helpita, sed kontraŭe
eĉ pli malsaniĝis, 27 aŭdinte pri Jesuo, venis en la
homamaso malantaŭ lin, kaj tuŝis lian mantelon. 28
Ĉar ŝi diris: Se mi nur tuŝos lian mantelon, mi estos
sanigita. 29 Kaj tuj la fonto de ŝia sango sekiĝis, kaj
ŝi korpe sentis, ke ŝi resaniĝis el sia malsano. 30 Kaj
Jesuo, tuj sentante en si, ke la potenco eliris, turnis
sin en la homamaso, kaj diris: Kiu tuŝis mian veston?
31 Kaj liaj disĉiploj diris al li: Vi vidas la homamason,
premantan vin, kaj ĉu vi diras: Kiu min tuŝis? 32 Kaj li
ĉirkaŭrigardis, por vidi tiun, kiu tion faris. 33 Sed la
virino, timigita kaj tremanta, sciante, kio fariĝis al ŝi,
venis kaj falis antaŭ li, kaj diris al li la tutan veron. 34
Kaj li diris al ŝi: Filino, via fido vin savis; iru en paco,
kaj estu sana el via malsano. 35 Dum li ankoraŭ parolis,
oni venis el la domo de la sinagogestro, dirante: Via
filino mortis; kial vi ankoraŭ ĝenas la instruiston?
36 Sed Jesuo, ne atentante la parolon diritan, diris
al la sinagogestro: Ne timu, nur kredu. 37 Kaj li ne
permesis al iu sekvi kun li, krom Petro kaj Jakobo, kaj
Johano, frato de Jakobo. 38 Kaj ili venis al la domo
de la sinagogestro, kaj li vidis tumulton, kaj homojn
plorantajn kaj funebre ĝemantajn. 39 Kaj enirinte, li
diris al ili: Kial vi tumultas kaj ploras? la infanino ne
mortis, sed dormas. 40 Kaj ili mokridis lin. Tamen,
foriginte ĉiujn, li kondukis la patron de la infanino
kaj la patrinon, kaj tiujn, kiuj estis kun li, kaj eniris
tien, kie estis la infanino. 41 Kaj preninte la manon
de la infanino, li diris al ŝi: Talita kumi; tio estas:
Knabineto, mi diras al vi: Leviĝu. 42 Kaj tuj leviĝis la
knabineto kaj piediris; ĉar ŝi estis dekdujara. Kaj ili
miris kun granda mirego. 43 Kaj li severe admonis ilin,
ke neniu sciiĝu pri tio; kaj li ordonis doni al ŝi manĝi.

**6** Kaj li eliris de tie, kaj venis en sian patrujon; kaj
liaj disĉiploj lin sekvis. 2 Kaj kiam venis la sabato,
li komencis instrui en la sinagogo; kaj multaj, lin
aŭdante, miris, dirante: De kie tiu viro havas tion?
kaj: Kia estas la saĝeco donita al li? kaj kiaj estas

tiaj potencaĵoj farataj per liaj manoj? 3 Ĉu ĉi tiu ne
estas la ĉarpentisto, filo de Maria, kaj frato de Jakobo
kaj Joses kaj Judas kaj Simon? kaj ĉu liaj fratinoj ne
estas ĉi tie ĉe ni? Kaj ili ofendiĝis pro li. 4 Kaj Jesuo
diris al ili: Profeto ne estas sen honoro, krom en sia
patrujo kaj inter siaj parencoj kaj en sia domo. 5
Kaj li povis tie fari nenian potencaĵon, krom tio, ke
li metis la manojn sur kelkajn senfortulojn kaj ilin
resanigis. 6 Kaj li miris pro ilia nekredemo. Kaj li
rondevizitis la vilaĝojn, instruante. 7 Kaj li alvokis
al si la dek du, kaj komencis forsendi ilin duope; kaj
li donis al ili aŭtoritaton super malpuraj spiritoj; 8
kaj li ordonis, ke ili portu nenion por la vojo krom
nur bastono — nek panon, nek saketon, nek monon
en sia zono; 9 sed ili iru piedvestitaj per sandaloj,
kaj ne surmetu du tunikojn. 10 Kaj li diris al ili: Kie
ajn vi eniros en domon, tie loĝu, ĝis vi foriros el tiu
loko. 11 Kaj se ie ajn oni vin ne akceptos, nek vin
aŭskultos, tiam el tie forirante, deskuu la polvon, kiu
estas sub viaj piedoj, por atesto al ili. 12 Kaj foririnte,
ili predikis, ke oni pentu. 13 Kaj ili elpeladis multajn
demonojn, kaj ŝmiradis per oleo multajn malsanulojn
kaj ilin sanigadis. 14 Kaj la reĝo Herodo aŭdis pri tio,
ĉar lia nomo jam konatiĝis; kaj li diris: Johano, la
Baptisto, leviĝis el la mortintoj, kaj tial tiuj potencaĵoj
energias en li. 15 Sed aliaj diris: Tiu estas Elija. Kaj
aliaj diris: Tiu estas profeto, kvazaŭ unu el la profetoj.
16 Sed, tion aŭdinte, Herodo diris: Johano, kiun mi
senkapigis, leviĝis. 17 Ĉar Herodo mem jam sendis,
kaj arestis Johanon, kaj ligis lin en malliberejo pro
Herodias, kiu estis edzino de lia frato Filipo, ĉar li
estis edziĝinta kun ŝi. 18 Ĉar Johano diris al Herodo:
Ne decas, ke vi havu la edzinon de via frato. 19 Kaj
Herodias klopodis kontraŭ li, kaj deziris mortigi lin,
kaj ne povis; 20 ĉar Herodo timis Johanon, sciante,
ke li estas viro justa kaj sankta, kaj nepre gardis lin.
Kaj aŭskultante lin, li embarasiĝis, kaj aŭskultis lin
volonte. 21 Kaj kiam venis oportuna tago, kiam Herodo
pro sia naskotago faris vespermanĝon al siaj nobeloj
kaj milestroj kaj ĉefoj de Galileo, 22 eniris la filino de
Herodias mem kaj dancis, kaj ŝi plaĉis al Herodo kaj al
liaj kunmanĝantoj; kaj la reĝo diris al la knabino: Petu
de mi, kion ajn vi volas, kaj mi tion donos al vi. 23 Kaj
li ĵuris al ŝi: Kion ajn vi petos de mi, mi tion donos al
vi, ĝis duono de mia regno. 24 Kaj elirinte, ŝi diris al
sia patrino: Kion mi petu? Kaj tiu diris: La kapon de
Johano, la Baptisto. 25 Kaj ŝi tuj eniris rapide al la
reĝo, kaj petis, dirante: Mi deziras, ke vi tuj donu al
mi sur plado la kapon de Johano, la Baptisto. 26 Kaj la
reĝo fariĝis tre malĝoja; tamen pro siaj ĵuroj kaj pro
la kunmanĝantoj li ne volis rifuzi al ŝi. 27 Kaj tuj la
reĝo elsendis soldaton el sia gardistaro, kaj ordonis
alporti lian kapon; kaj elirinte, tiu senkapigis lin en la
malliberejo, 28 kaj alportis lian kapon sur plado, kaj
donis ĝin al la knabino; kaj la knabino donis ĝin al
sia patrino. 29 Kaj kiam liaj disĉiploj aŭdis, ili venis
kaj forportis lian korpon, kaj metis ĝin en tombon.
30 Kaj la apostoloj kolektiĝis al Jesuo, kaj rakontis al
li ĉion, kion ili faris kaj instruis. 31 Kaj li diris al ili:
Venu mem aparte en dezertan lokon, kaj iom ripozu.
Ĉar estis multaj venantaj kaj irantaj, kaj ili ne havis
oportunon eĉ por manĝi. 32 Kaj ili foriris en la ŝipeto
al dezerta loko aparte. 33 Kaj oni vidis ilin forirantajn,
kaj multaj rekonis ilin, kaj piede oni kuris tien el ĉiuj
urboj kaj antaŭvenis ilin. 34 Kaj li elvenis, kaj vidis
grandan homamason, kaj li kortuŝiĝis pri ili, ĉar ili
estis kiel ŝafoj ne havantaj paŝtiston; kaj li komencis
instrui al ili multon. 35 Kaj kiam la horo jam estis
malfrua, liaj disĉiploj venis al li, kaj diris: La loko estas
dezerta, kaj la horo estas jam malfrua; 36 forsendu
ilin, por ke ili iru en la ĉirkaŭajn kampojn kaj vilaĝojn
kaj aĉetu por si manĝaĵon. 37 Sed li responde diris
al ili: Vi donu al ili manĝi. Kaj ili diris al li: Ĉu ni
iru kaj aĉetu panojn por ducent denaroj, kaj donu
al ili manĝi? 38 Kaj li diris al ili: Kiom da panoj vi
havas? iru, por vidi. Kaj sciiĝinte, ili diris: Kvin, kaj du
fiŝojn. 39 Kaj li ordonis al ili, ke ĉiuj sidiĝu laŭgrupe
sur la verda herbo. 40 Kaj ili sidiĝis en aroj, centope
kaj kvindekope. 41 Kaj li prenis la kvin panojn kaj
la du fiŝojn, kaj suprenrigardinte al la ĉielo, li benis
kaj dispecigis la panojn, kaj donis al la disĉiploj, por
meti antaŭ ilin; kaj li dividis la du fiŝojn inter ĉiuj.
42 Kaj ĉiuj manĝis kaj satiĝis. 43 Kaj oni kolektis da
fragmentoj dek du korbojn, kaj ankaŭ el la fiŝoj. 44 Kaj
tiuj, kiuj manĝis la panojn, estis kvin mil viroj. 45 Kaj
tuj li devigis siajn disĉiplojn eniri en la ŝipeton kaj iri
antaŭ li al la alia bordo, al Betsaida, dum li forsendos
la homamason. 46 Kaj adiaŭinte ilin, li foriris sur la
monton, por preĝi. 47 Kaj kiam vesperiĝis, la ŝipeto
estis meze de la maro, kaj li sola sur la tero. 48 Kaj
vidante ilin laborantaj en malfacila remado, ĉar la
vento estis kontraŭa al ili, ĉirkaŭ la kvara gardoparto
de la nokto li venis al ili, irante sur la maro, kaj li
volis preterpasi ilin; 49 sed ili, vidante lin iranta sur la

maro, supozis, ke ĝi estas fantomo, kaj ili ekkriis; 50
ĉar ĉiuj vidis lin kaj maltrankviliĝis. Sed li tuj parolis
kun ili, kaj diris al ili: Kuraĝu; ĝi estas mi; ne timu.
51 Kaj li supreniris al ili en la ŝipeton, kaj la vento
ĉesiĝis; kaj ili sentis grandan miregon; 52 ĉar ili ne
komprenis pri la panoj, ĉar ilia koro estis sensenta.
53 Kaj transirinte, ili alvenis teren ĉe Genesaret, kaj
alligis la ŝipeton. 54 Kaj kiam ili estis elŝipiĝintaj, tuj
oni rekonis lin, 55 kaj kuris tra tiu tuta regiono, kaj
komencis ĉirkaŭporti la malsanulojn sur iliaj litoj tien,
kie ili aŭdis, ke li estas. 56 Kaj kien ajn li eniris, en
vilaĝojn aŭ en urbojn aŭ sur la kamparon, ili demetis
la malsanulojn sur la placoj, kaj petegis lin, ke ili
tuŝu nur la randon de lia vesto; kaj ĉiuj, kiuj tuŝis,
resaniĝis.

**7** Kaj kolektiĝis al li la Fariseoj kaj iuj el la skribistoj,
kiuj venis el Jerusalem, 2 kaj jam vidis, ke kelkaj el
liaj disĉiploj manĝas panon kun manoj profanaj, tio
estas nelavitaj. 3 Kaj la Fariseoj kaj ĉiuj Judoj, se ili ne
lavis zorge la manojn, ne manĝas, tenante la tradicion
de la antaŭuloj; 4 kaj veninte el komercejo, ili ne
manĝas, ne sin lavinte; kaj estas multaj aliaj aferoj,
kiujn ili ricevis por observi, trempon de pokaloj kaj
mezurpotoj kaj kupraj vazoj. 5 Kaj lin demandis la
Fariseoj kaj la skribistoj: Kial ne faras viaj disĉiploj
laŭ la tradicio de la antaŭuloj, sed manĝas panon
kun manoj profanaj? 6 Kaj li diris al ili: Bone profetis
Jesaja pri vi hipokrituloj, kiel estas skribite: Ĉi tiu
popolo honoras Min per siaj lipoj, Sed ilia koro
estas malproksime de Mi. 7 Sed vane ili Min adoras,
Instruante kiel doktrinojn ordonojn de homoj. 8 Ĉar,
forlasinte la ordonon de Dio, vi tenas la tradicion de
homoj. 9 Kaj li diris al ili: Efektive vi forrifuzas la
ordonon de Dio, por observi vian tradicion. 10 Ĉar
Moseo diris: Respektu vian patron kaj vian patrinon;
kaj: Kiu malbenas sian patron aŭ sian patrinon, tiu
nepre mortu. 11 Sed vi diras: Se iu diros al sia patro aŭ
sia patrino: Korban, tio estas Oferdono, estu tio, per
kio vi povus profiti de mi, 12 vi jam ne permesas al li
fari ion por sia patro aŭ sia patrino; 13 vantigante la
vorton de Dio per via tradicio, kiun vi transdonis; kaj
multajn tiajn aferojn vi faras. 14 Kaj denove alvokinte
la homamason, li diris al ili: Ĉiuj min aŭskultu kaj
komprenu: 15 ekzistas nenio, kio, enirante en homon
de ekstere, povas lin profani; sed kio eliras el homo,
tio profanas la homon. 16 Kiu havas orelojn por aŭdi,
tiu aŭdu. 17 Kaj kiam li eniris en domon for de la
homamaso, liaj disĉiploj demandis lin pri la parabolo.
18 Kaj li diris al ili: Ĉu vi ankaŭ estas tiel sen kompreno?
Ĉu vi ne konscias, ke ĉio, eniranta de ekstere en
homon, ne povas profani lin; 19 ĉar ĝi eniras ne en
lian koron, sed en la ventron, kaj eliras en apartan
lokon? Tion li diris, indigante ĉiajn manĝaĵojn. 20
Kaj li diris: Kio elvenas el homo, tio profanas la
homon. 21 Ĉar de interne, el la koro de homoj, eliras
malvirtaj pensoj, malĉastaĵoj, 22 ŝteloj, mortigoj,
adultoj, avideco, malindaĵoj, ruzeco, voluptoj, malica
okulo, blasfemo, aroganteco, malsaĝeco; 23 ĉiuj tiuj
malbonoj elvenas de interne kaj profanas la homon.
24 Kaj irinte de tie, li venis en la limojn de Tiro kaj
Cidon. Kaj enirinte en domon, li volis, ke neniu sciu;
sed li ne povis esti kaŝita. 25 Sed aŭdinte pri li, iu
virino, kies filineto havis malpuran spiriton, venis kaj
falis antaŭ liaj piedoj. 26 Kaj la virino estis Grekino,
rase Sirofenika. Kaj ŝi petis lin, ke li elpelu la demonon
el ŝia filino. 27 Kaj li diris al ŝi: Lasu unue satigi la
infanojn, ĉar ne decas preni la panon de la infanoj
kaj ĵeti ĝin al la hundetoj. 28 Sed ŝi respondis kaj
diris al li: Jes, Sinjoro; ĉar eĉ la hundetoj sub la tablo
manĝas el la panpecetoj de la infanoj. 29 Kaj li diris al
ŝi: Pro ĉi tiu vorto iru vian vojon; la demono eliris
el via filino. 30 Kaj kiam ŝi iris en sian domon, ŝi
trovis la infaninon kuŝigita sur la lito, kaj la demonon
foririnta. 31 Kaj denove foririnte el la limoj de Tiro,
li venis tra Cidon al la Galilea Maro, tra la mezo de
la limoj de Dekapolis. 32 Kaj oni kondukis al li viron
surdan kaj apenaŭ parolkapablan, kaj petis lin, ke li
metu sian manon sur lin. 33 Kaj kondukinte lin el la
homamaso en apartan lokon, li metis siajn fingrojn
en liajn orelojn, kaj kraĉinte, li tuŝis lian langon; 34
kaj suprenrigardinte al la ĉielo, li ĝemis, kaj diris
al li: Efata, tio estas: Malfermiĝu. 35 Kaj liaj oreloj
malfermiĝis, kaj la ligilo de lia lango malstreĉiĝis, kaj
li parolis klare. 36 Kaj li admonis ilin, ke oni diru tion
al neniu; sed ju pli li malpermesis, des pli multe ili ĉie
sciigis ĝin. 37 Kaj supermezure ili miregis, dirante:
Li faris ĉion bone; li igas la surdulojn aŭdi, kaj la
mutulojn paroli.

**8** En tiuj tagoj, kiam denove estis granda homamaso,
kaj ili nenion havis manĝi, li alvokis al si siajn
disĉiplojn, kaj diris al ili: 2 Mi kortuŝiĝas pro la
homamaso, ĉar jam tri tagojn ili restas ĉe mi kaj

nenion havas manĝi; 3 kaj se mi forsendos ilin
fastantaj al iliaj domoj, ili laciĝos sur la vojo; kaj iuj el
ili venis de malproksime. 4 Kaj liaj disĉiploj respondis
al li: De kie oni povos satigi ĉi tiujn homojn per panoj
ĉi tie en dezerto? 5 Kaj li demandis ilin: Kiom da
panoj vi havas? Kaj ili diris: Sep. 6 Kaj li ordonis al
la homamaso sidiĝi sur la tero; kaj li prenis la sep
panojn, kaj doninte dankon, li dispecigis ilin, kaj
donis al la disĉiploj por disdoni; kaj ili disdonis al la
homamaso. 7 Kaj ili havis kelkajn malgrandajn fiŝojn;
kaj beninte ilin, li ordonis disdoni ilin ankaŭ. 8 Kaj ili
manĝis kaj satiĝis; kaj oni kolektis da postrestintaj
fragmentoj sep korbegojn. 9 Kaj ili estis proksimume
kvar mil, kaj li forsendis ilin. 10 Kaj tuj enirinte
en la ŝipeton kun siaj disĉiploj, li iris al la regiono
Dalmanuta. 11 Kaj alvenis la Fariseoj, kaj komencis
diskuti kun li, serĉante ĉe li signon el la ĉielo, por
provi lin. 12 Kaj forte ĝeminte en sia spirito, li diris:
Kial ĉi tiu generacio serĉas signon? vere, mi diras al
vi: Nenia signo estos donita al ĉi tiu generacio. 13
Kaj forlasinte ilin, li denove enŝipiĝis kaj transiris
al la alia bordo. 14 Kaj ili forgesis preni panojn; kaj
nur unu panon ili havis kun si en la ŝipeto. 15 Kaj li
admonis ilin, dirante: Zorgu, gardu vin kontraŭ la
fermentaĵo de la Fariseoj kaj la fermentaĵo de Herodo.
16 Kaj ili diskutis unu kun la alia, dirante: Ĉar ni ne
havas panojn. 17 Kaj Jesuo, eksciante tion, diris al
ili: Kial vi diskutas pro tio, ke vi ne havas panon?
ĉu vi ankoraŭ ne konscias nek komprenas? ĉu via
koro estas obstinigita? 18 Okulojn havante, ĉu vi ne
vidas? kaj orelojn havante, ĉu vi ne aŭdas? kaj ĉu vi
ne memoras? 19 Kiam mi dispecigis la kvin panojn por
la kvin mil, kiom da korboj da fragmentoj vi kolektis?
Ili respondis al li: Dek du. 20 Kaj kiam la sep por la
kvar mil, kiom da korbegoj da fragmentoj vi kolektis?
Kaj ili respondis al li: Sep. 21 Kaj li diris al ili: Ĉu vi
ankoraŭ ne komprenas? 22 Kaj ili alvenis al Betsaida.
Kaj oni alkondukis al li blindulon, kaj petegis, ke li
tuŝu lin. 23 Kaj preninte la manon de la blindulo,
li elkondukis lin ekster la vilaĝon; kaj kraĉinte sur
liajn okulojn, kaj surmetinte la manojn sur lin, li
demandis lin: Ĉu vi vidas ion? 24 Kaj li ekrigardis, kaj
diris: Mi vidas homojn, ĉar mi vidas kvazaŭ arbojn
irantajn. 25 Tiam denove li metis la manojn sur liajn
okulojn; kaj li fikse rigardis, kaj resaniĝis, kaj vidis
ĉion klare. 26 Kaj li forsendis lin al lia domo, dirante:
Nepre ne eniru en la vilaĝon. 27 Kaj eliris Jesuo kaj
liaj disĉiploj en la vilaĝojn de Cezarea Filipi; kaj sur la
vojo li demandis siajn disĉiplojn, dirante al ili: Kiu,
diras la homoj, ke mi estas? 28 Kaj ili respondis al li:
Johano, la Baptisto; laŭ aliaj: Elija; kaj laŭ aliaj: Unu el
la profetoj. 29 Kaj li demandis ilin: Sed vi — kiu vi
diras, ke mi estas? Petro responde diris al li: Vi estas
la Kristo. 30 Kaj li admonis ilin, ke ili diru al neniu pri
li. 31 Kaj li komencis instrui al ili, ke la Filo de homo
devas multe suferi, kaj esti rifuzita de la pliaĝuloj
kaj la ĉefpastroj kaj la skribistoj, kaj esti mortigita,
kaj post tri tagoj releviĝi. 32 Kaj li parolis tiun diron
malkaŝe. Kaj Petro prenis lin, kaj komencis admoni
lin. 33 Sed turninte sin kaj rigardante la disĉiplojn, li
admonis Petron, dirante: Iru malantaŭ min, Satano,
ĉar vi havas pensojn ne laŭ Dio, sed laŭ homoj. 34
Kaj alvokinte al si la homamason kun siaj disĉiploj, li
diris al ili: Se iu volas veni post mi, li abnegaciu sin,
kaj levu sian krucon, kaj sekvu min. 35 Ĉar kiu volos
savi sian animon, tiu ĝin perdos; kaj kiu perdos sian
animon pro mi kaj pro la evangelio, tiu ĝin savos. 36
Ĉar kiel profitus homo, se li gajnus la tutan mondon
kaj perdus sian animon? 37 Ĉar kion homo donu
interŝanĝe por sia animo? 38 Ĉar kiu hontos pri mi kaj
miaj paroloj antaŭ ĉi tiu adultema kaj peka generacio,
pri tiu ankaŭ hontos la Filo de homo, kiam li venos en
la gloro de sia Patro kun la sanktaj anĝeloj.

9 Kaj li diris al ili: Vere mi diras al vi: Inter la
ĉi tie starantaj estas iuj, kiuj neniel gustumos
morton, antaŭ ol ili vidos la regnon de Dio venintan
en potenco. 2 Kaj post ses tagoj Jesuo prenis kun si
Petron kaj Jakobon kaj Johanon, kaj kondukis ilin
solajn sur altan monton aparte; kaj li estis aliformita
antaŭ ili; 3 kaj liaj vestoj fariĝis brilantaj, treege
blankaj, kiel fulisto sur la tero ne povas blankigi. 4 Kaj
aperis al ili Elija kun Moseo, kaj ili interparoladis kun
Jesuo. 5 Kaj Petro responde diris al Jesuo: Rabeno,
estas bone por ni esti ĉi tie; kaj ni faru tri laŭbojn:
unu por vi, kaj unu por Moseo, kaj unu por Elija. 6
Ĉar li ne sciis, kion respondi, ĉar ili tre timiĝis. 7 Kaj
nubo superombris ilin; kaj elvenis voĉo el la nubo:
Ĉi tiu estas Mia Filo, la amata; aŭskultu lin. 8 Kaj
subite, ĉirkaŭrigardinte, ili jam vidis neniun krom
Jesuo sola. 9 Kaj dum ili malsupreniris de la monto,
li admonis ilin, ke al neniu ili rakontu tion, kion ili
vidis, ĝis la Filo de homo releviĝos el la mortintoj. 10
Kaj ili konservis la diron, demandante inter si, kion

signifas la releviĝo el la mortintoj. 11 Kaj ili demandis
lin, dirante: Kial diras la skribistoj, ke Elija devas veni
antaŭe? 12 Kaj li diris al ili: Vere Elija venas antaŭe,
kaj restarigas ĉion; kaj kiel estas skribite pri la Filo de
homo, ke li devas multe suferi kaj esti malestimata?
13 Sed mi diras al vi, ke Elija jam venis, kaj oni faris al
li ĉion, kion ili volis, kiel estas skribite pri li. 14 Kaj
veninte al la disĉiploj, ili vidis grandan homamason
ĉirkaŭ ili, kaj skribistojn diskutantajn kun ili. 15 Kaj tuj
la homamaso, vidante lin, forte miris, kaj alkuris, kaj
salutis lin. 16 Kaj li demandis ilin: Pri kio vi diskutas
kun ili? 17 Kaj unu el la amaso respondis al li: Majstro,
mi venigis al vi mian filon, kiu havas mutan spiriton;
18 kaj kie ajn ĝi kaptas lin, ĝi ŝiras lin, kaj li ŝaŭmas
kaj grincigas la dentojn kaj kadukiĝas; kaj mi parolis
al viaj disĉiploj, ke ili elpelu ĝin; kaj ili ne povis. 19 Kaj
li respondis al ili, dirante: Ho senfida generacio, ĝis
kiam mi estos kun vi? ĝis kiam mi toleros vin? venigu
lin al mi. 20 Kaj ili venigis lin al li; kaj vidinte lin, tuj
la spirito konvulsiigis lin, kaj li falis teren kaj ruliĝis
ŝaŭmanta. 21 Kaj li demandis la patron: De kiom da
tempo okazadas ĉi tio al li? Kaj li diris: De infaneco. 22
Kaj ofte ĝi ĵetis lin en fajron kaj en akvon, por pereigi
lin; sed se vi povas fari ion, kompatu al ni kaj helpu
nin. 23 Kaj Jesuo diris al li: Kiel, se vi povas! Ĉio estas
ebla por kredanto. 24 Tuj ekkriante, la patro de la
infano diris: Mi kredas; helpu mian nekredemon. 25
Kaj kiam Jesuo vidis, ke homamaso alkuras, li severe
admonis la malpuran spiriton, dirante al ĝi: Vi muta
kaj surda spirito, mi ordonas al vi: Eliru el li, kaj ne plu
eniru en lin. 26 Kaj ekkriinte, kaj multe konvulsiiginte
lin, ĝi eliris; kaj li fariĝis kvazaŭ mortinto, tiel ke la
plimulto diris: Li mortis. 27 Sed Jesuo, preninte lin je
la mano, levis lin; kaj li stariĝis. 28 Kaj kiam li eniris
en la domon, liaj disĉiploj aparte demandis lin: Kial ni
ne povis elpeli ĝin? 29 Kaj li diris al ili: Ĉi tiu speco
neniel povas eliri, krom per preĝado. 30 Kaj foririnte,
ili trapasis tra Galileo; kaj li deziris, ke neniu tion
eksciu. 31 Ĉar li instruadis siajn disĉiplojn, kaj diris al
ili: La Filo de homo estas transdonita en la manojn de
homoj, kaj ili mortigos lin; kaj, mortigite, li leviĝos
post tri tagoj. 32 Sed ili ne komprenis la diron, kaj
timis demandi lin. 33 Kaj ili venis al Kapernaum, kaj
kiam li estis en la domo, li demandis ilin: Pri kio vi
diskutis sur la vojo? 34 Sed ili silentis; ĉar ili diskutis
inter si sur la vojo pri tio, kiu estas la plej granda. 35
Kaj sidiĝinte, li alvokis la dek du, kaj diris al ili: Se
iu volas esti unua, li estos lasta el ĉiuj, kaj servanto
de ĉiuj. 36 Kaj preninte infanon, li starigis ĝin meze
de ili; kaj ĉirkaŭbrakinte ĝin, li diris al ili: 37 Kiu
akceptos unu el tiaj infanoj en mia nomo, tiu akceptas
min; kaj kiu akceptas min, tiu akceptas ne min, sed
Tiun, kiu sendis min. 38 Johano diris al li: Majstro, ni
vidis iun elpelantan demonojn en via nomo; kaj ni
malpermesis lin, ĉar li ne sekvas nin. 39 Sed Jesuo
diris: Ne malpermesu lin; ĉar neniu, kiu faros miraklon
en mia nomo, povos facile paroli malbone pri mi.
40 Ĉar tiu, kiu ne estas kontraŭ ni, estas por ni. 41
Ĉar kiu donos al vi trinki tason da akvo, pro tio, ke
vi apartenas al Kristo, vere mi diras al vi, tiu neniel
perdos sian rekompencon. 42 Kaj kiu igos fali unu el
ĉi tiuj malgranduloj, kiuj kredas al mi, estus pli bone
por tiu, se granda muelŝtono estus pendigita ĉirkaŭ
lia kolo, kaj se li estus ĵetita en la maron. 43 Kaj se via
mano faligas vin, detranĉu ĝin: estas bone por vi eniri
en vivon kripla prefere ol, havante du manojn, eniri
en Gehenan, en la neestingeblan fajron, **(Geenna g1067)**
44 kie ilia vermo ne pereas kaj la fajro ne estingiĝas. 45
Kaj se via piedo faligas vin, detranĉu ĝin: estas bone
por vi eniri en vivon lama prefere ol, havante du
piedojn, esti ĵetita en Gehenan, **(Geenna g1067)** 46 kie ilia
vermo ne pereas kaj la fajro ne estingiĝas. 47 Kaj se
via okulo faligas vin, elŝiru ĝin: estas bone por vi eniri
en la regnon de Dio kun unu okulo prefere ol, havante
du okulojn, esti ĵetita en Gehenan, **(Geenna g1067)** 48 kie
ilia vermo ne pereas kaj la fajro ne estingiĝas. 49 Ĉar
ĉiu estos salita per fajro. 50 Salo estas bona; sed se la
salo fariĝis nesala, kiel vi rebonigos ĝin? Havu salon
en vi, kaj paciĝu unu kun alia.

**10** Kaj li foriris de tie, kaj venis en la limojn de Judujo
kaj trans Jordanon; kaj homamasoj kunvenis
denove al li, kaj laŭ sia kutimo li instruis ilin denove.
2 Kaj Fariseoj venis, kaj demandis lin, por provi lin: Ĉu
estas permesate al viro forsendi sian edzinon? 3 Kaj li
responde diris al ili: Kion Moseo ordonis al vi? 4 Kaj
ili diris: Moseo permesis skribi eksedzigan leteron, kaj
forsendi ŝin. 5 Sed Jesuo diris al ili: Pro la malmoleco
de via koro li skribis por vi ĉi tiun ordonon. 6 Sed de
la komenco de la kreo: Li faris ilin vira kaj virina. 7
Tial viro forlasos sian patron kaj sian patrinon, kaj
aliĝos al sia edzino, 8 kaj ili estos unu karno; sekve ili
jam estas ne du, sed unu karno. 9 Kion do Dio kunigis,
tion homo ne disigu. 10 Kaj en la domo la disĉiploj

denove demandis lin pri la afero. 11 Kaj li diris al ili:
Kiu forsendos sian edzinon kaj edziĝos kun alia, tiu
adultas kontraŭ ŝi; 12 kaj se ŝi mem forsendos sian
edzon kaj edziniĝos kun alia, ŝi adultas. 13 Kaj oni
venigis al li infanojn, por ke li tuŝu ilin; kaj la disĉiploj
admonis ilin. 14 Sed Jesuo, vidinte tion, indignis, kaj
diris al ili: Lasu la infanojn veni al mi; ne malhelpu
ilin, ĉar el tiaj estas la regno de Dio. 15 Vere mi diras
al vi: Kiu ne akceptos la regnon de Dio kiel infano,
tiu neniel eniros en ĝin. 16 Kaj li prenis ilin en siaj
brakoj, kaj benis ilin, metinte la manojn sur ilin. 17
Kaj dum li foriris sur la vojo, unu homo kuris al li
kaj genuis antaŭ li, kaj demandis lin: Bona Majstro,
kion mi faru, por ke mi heredu eternan vivon? (aiōnios
g166) 18 Kaj Jesuo diris al li: Kial vi nomas min bona?
neniu estas bona krom Unu, nome Dio. 19 Vi scias la
ordonojn: Ne mortigu; Ne adultu; Ne ŝtelu; Ne parolu
malveran ateston; Ne rabu; Respektu vian patron kaj
vian patrinon. 20 Kaj li responde diris al li: Majstro,
ĉion tion mi observis detempe de mia juneco. 21 Kaj
Jesuo, rigardante lin, amis lin, kaj diris al li: Unu
mankon vi havas; iru, kaj vendu ĉion, kion vi havas,
kaj donu al malriĉuloj, kaj vi havos trezoron en la
ĉielo; kaj venu, sekvu min. 22 Sed li malgajiĝis ĉe
tiu vorto, kaj foriris malĝoja; ĉar li havis multajn
posedaĵojn. 23 Kaj Jesuo ĉirkaŭrigardis, kaj diris al siaj
disĉiploj: Kiel malfacile tiuj, kiuj havas riĉon, eniros
en la regnon de Dio! 24 Kaj la disĉiploj miris pro liaj
vortoj. Sed Jesuo, respondante denove, diris al ili:
Infanoj, kiel malfacile estas por tiuj, kiuj fidas al la
riĉo, eniri en la regnon de Dio! 25 Estas pli facile por
kamelo iri tra trueton de kudrilo, ol por riĉulo eniri
en la regnon de Dio. 26 Kaj ili forte miregis, dirante al
li: Kiu do povas esti savita? 27 Rigardante ilin, Jesuo
diris: Ĉe homoj tio estas neebla, sed ne ĉe Dio; ĉar ĉio
estas ebla ĉe Dio. 28 Petro ekparolis al li: Jen ni ĉion
forlasis kaj vin sekvis. 29 Jesuo diris: Vere mi diras
al vi: Ekzistas neniu, kiu forlasis domon aŭ fratojn
aŭ fratinojn aŭ patrinon aŭ patron aŭ infanojn aŭ
kampojn pro mi kaj pro la evangelio, 30 kaj kiu ne
ricevos centoble en ĉi tiu tempo, domojn kaj fratojn
kaj fratinojn kaj patrinojn kaj infanojn kaj kampojn,
kun persekutado; kaj en la venonta mondo eternan
vivon. (aiōn g165, aiōnios g166) 31 Sed multaj unuaj estos
lastaj, kaj lastaj estos unuaj. 32 Kaj ili estis sur la vojo
suprenirantaj al Jerusalem, kaj Jesuo iris antaŭ ili;
kaj ili miregis, kaj la sekvantoj timis. Kaj li prenis al
si denove la dek du, kaj ekparolis pri tio, kio okazos
al li, dirante: 33 Jen ni supreniras al Jerusalem; kaj
la Filo de homo estos transdonita al la ĉefpastroj
kaj la skribistoj; kaj ili kondamnos lin al morto kaj
transdonos lin al la nacianoj; 34 kaj ili lin mokos kaj
sur lin kraĉos kaj lin skurĝos kaj lin mortigos; kaj post
tri tagoj li releviĝos. 35 Kaj alproksimiĝis al li Jakobo
kaj Johano, filoj de Zebedeo, dirante al li: Majstro, ni
deziras, ke, kion ajn ni petos de vi, vi tion faru por ni.
36 Kaj li diris al ili: Kion vi volas, ke mi faru por vi? 37
Kaj ili diris al li: Permesu, ke ni povu sidi, unu dekstre
de vi kaj la dua maldekstre, en via gloro. 38 Sed Jesuo
diris al ili: Vi ne scias, kion vi petas. Ĉu vi povas trinki
la kalikon, kiun mi trinkas? aŭ esti baptitaj per la
bapto, per kiu mi estas baptata? 39 Kaj ili diris al li:
Ni povas. Kaj Jesuo diris al ili: La kalikon, kiun mi
trinkas, vi trinkos, kaj per la bapto, per kiu mi estas
baptata, vi estos baptitaj; 40 sed sidi dekstre de mi aŭ
maldekstre, tion doni ne apartenas al mi; sed ĝi estas
por tiuj, por kiuj ĝi estas preparita. 41 Kaj aŭdinte,
la dek ekindignis kontraŭ Jakobo kaj Johano. 42 Kaj
Jesuo, alvokinte ilin al si, diris al ili: Vi scias, ke tiuj,
kiuj pretendas regi la nacianojn, kondutas kiel sinjoroj
super ili, kaj iliaj granduloj ekzercas aŭtoritaton super
ili. 43 Sed ne tiel estos inter vi; sed kiu volas esti
granda inter vi, tiu estu via servanto; 44 kaj kiu volas
esti la unua inter vi, tiu estu sklavo de ĉiuj. 45 Ĉar la
Filo de homo venis, ne por esti servata, sed por servi,
kaj por doni sian vivon kiel elaĉeton por multaj. 46
Kaj ili venis al Jeriĥo; kaj kiam li foriris el Jeriĥo kun
siaj disĉiploj kaj granda homamaso, la filo de Timeo,
Bartimeo, blinda almozulo, sidis apud la vojo. 47 Kaj
aŭdinte, ke ĉeestas Jesuo, la Nazaretano, li ekkriis, kaj
diris: Jesuo, filo de David, kompatu min. 48 Kaj multaj
admonis lin, ke li silentu; sed li des pli forte kriis: Ho
Filo de David, kompatu min! 49 Kaj Jesuo haltis, kaj
diris: Alvoku lin. Kaj oni alvokis la blindulon, dirante
al li: Kuraĝu; leviĝu, li vin alvokas. 50 Kaj li forĵetis
sian veston, kaj eksaltis kaj venis al Jesuo. 51 Kaj Jesuo
responde al li diris: Kion vi volas, ke mi faru al vi?
Kaj la blindulo diris al li: Rabeno mia, ke mi ricevu
vidpovon. 52 Kaj Jesuo diris al li: Iru; via fido vin savis.
Kaj tuj li ricevis vidpovon, kaj sekvis lin sur la vojo.

**11** Kaj kiam ili alproksimiĝis al Jerusalem, al Betfage
kaj Betania, apud la monto Olivarba, li sendis
du el siaj disĉiploj, 2 kaj diris al ili: Iru en la vilaĝon,

kiu estas kontraŭ vi, kaj enirinte ĝin, vi tuj trovos
azenidon alligitan, sur kiu ankoraŭ neniu iam sidis;
malligu kaj alkonduku ĝin. 3 Kaj se iu diros al vi:
Kial vi faras tion? respondu: La Sinjoro bezonas ĝin;
kaj tuj li sendos ĝin ĉi tien. 4 Kaj ili iris, kaj trovis
azenidon alligitan apud pordo ekstere sur la strato; kaj
ili malligis ĝin. 5 Kaj iuj apudstarantoj diris al ili: Kion
vi faras, malligante la azenidon? 6 Sed ili respondis al
ili, kiel Jesuo diris; kaj ili lasis ilin. 7 Kaj ili alkondukis
la azenidon al Jesuo, kaj metis sur ĝin siajn vestojn;
kaj li sidis sur ĝi. 8 Kaj multaj sternis siajn vestojn sur
la vojo, kaj aliaj sternis foliarojn, tranĉinte ilin el la
kampoj. 9 Kaj kriis la antaŭirantoj kaj la sekvantoj:
Hosana! Estu benata tiu, kiu venas en la nomo de la
Eternulo; 10 Estu benata la venanta regno de nia patro
David; Hosana en la supera alto! 11 Kaj li eniris en
Jerusalemon, en la templon; kaj kiam li ĉirkaŭrigardis
ĉion, kaj la horo jam vesperiĝis, li foriris al Betania
kun la dek du. 12 Kaj la morgaŭan tagon, post ilia eliro
el Betania, li malsatis. 13 Kaj vidinte el malproksime
figarbon havantan foliojn, li aliris, por trovi, se eble,
ion sur ĝi; kaj veninte al ĝi, li trovis nenion krom
folioj, ĉar la tempo de figoj ankoraŭ ne venis. 14 Kaj
responde li diris al ĝi: Neniu por ĉiam manĝu frukton
el vi. Kaj aŭdis la disĉiploj. (aiōn g165) 15 Kaj ili venis en
Jerusalemon; kaj enirinte en la templon, li komencis
elpeli la vendantojn kaj la aĉetantojn en la templo, kaj
renversis la tablojn de la monŝanĝistoj kaj la seĝojn
de la vendantoj de kolomboj; 16 kaj ne permesis, ke
oni portu ian vazon tra la templo. 17 Kaj li instruis,
kaj diris al ili: Ĉu ne estas skribite: Mia domo estos
nomata domo de preĝo por ĉiuj popoloj? Sed vi faris
ĝin kaverno de rabistoj. 18 Kaj la ĉefpastroj kaj la
skribistoj aŭdis tion, kaj serĉis, kiamaniere pereigi
lin; ĉar ili timis lin, ĉar la tuta homamaso miregis
pro lia instruado. 19 Kaj kiam vesperiĝis, li eliris el
la urbo. 20 Kaj matene, preterpasante, ili vidis la
figarbon forvelkinta de la radikoj. 21 Kaj rememorinte,
Petro diris al li: Rabeno, jen forvelkis la figarbo, kiun
vi malbenis. 22 Kaj responde Jesuo diris al ili: Havu
fidon al Dio. 23 Vere mi diras al vi: Se iu diros al ĉi tiu
monto: Estu formovita kaj ĵetita en la maron, kaj ne
dubos en sia koro, sed kredos, ke okazos tio, kion li
diras, tiu ĝin havos. 24 Pro tio mi diras al vi: Kion ajn
vi petos, preĝante, kredu, ke vi tion jam ricevis, kaj vi
ĝin havos. 25 Kaj kiam vi staras preĝante, pardonu,
se vi havas ion kontraŭ iu; por ke ankaŭ via Patro,
kiu estas en la ĉielo, pardonu al vi viajn erarojn. 26
Sed se vi ne pardonos, ankaŭ via Patro, kiu estas en
la ĉielo, ne pardonos viajn erarojn. 27 Kaj ili denove
venis al Jerusalem; kaj dum li ĉirkaŭiris en la templo,
la ĉefpastroj kaj la skribistoj kaj la pliaĝuloj venis al li,
28 kaj diris al li: Laŭ kia aŭtoritato vi faras ĉi tion? aŭ
kiu donis al vi tian aŭtoritaton, ke vi faru ĉi tion? 29
Sed Jesuo diris al ili: Mi faros al vi unu demandon, kaj
respondu al mi, kaj mi diros al vi, laŭ kia aŭtoritato
mi faras ĉi tion. 30 La baptado de Johano, ĉu ĝi estis
el la ĉielo, aŭ el homoj? respondu al mi. 31 Kaj ili
diskutis inter si, dirante: Se ni diros: El la ĉielo, li
diros: Kial do vi ne kredis al li? 32 Sed se ni diros:
El homoj — ili timis la popolon, ĉar ĉiuj opiniis, ke
Johano efektive estis profeto. 33 Kaj responde ili diris
al Jesuo: Ni ne scias. Kaj Jesuo diris al ili: Kaj mi ne
diras al vi, laŭ kia aŭtoritato mi faras ĉi tion.

12 Kaj li komencis paroli al ili per paraboloj.
Vinberĝardenon plantis unu viro, kaj ĉirkaŭmetis
plektobarilon, kaj fosis vinpremejon, kaj konstruis
turon, kaj luigis ĝin al kultivistoj, kaj forvojaĝis. 2 Kaj
li sendis sklavon en la ĝusta tempo al la kultivistoj,
por ricevi de la kultivistoj el la fruktoj de la vinberejo.
3 Kaj ili kaptis lin kaj skurĝis lin, kaj forsendis lin
senhava. 4 Kaj poste li sendis al ili duan sklavon;
kaj ili lin kapvundis kaj malhonoris. 5 Kaj li sendis
alian, kaj ili mortigis lin; kaj multajn aliajn; skurĝante
unujn, kaj mortigante aliajn. 6 Li havis ankoraŭ unu
amatan filon: li sendis lin ankaŭ la lastan al ili, dirante:
Ili respektos mian filon. 7 Sed tiuj kultivistoj diris
inter si: Ĉi tiu estas la heredonto; venu, ni mortigu
lin, kaj la heredaĵo estos nia. 8 Kaj ili kaptis kaj
mortigis lin, kaj elĵetis lin ekster la vinberejon. 9
Kion do faros la sinjoro de la vinberejo? li venos
kaj pereigos la kultivistojn, kaj donos la vinberejon
al aliaj. 10 Ĉu vi ne legis tiun skribon: Ŝtono, kiun
malŝatis la konstruantoj, Fariĝis ŝtono bazangula; 11
De la Eternulo ĉi tio fariĝis, Kaj ĝi estas miraklo en
niaj okuloj? 12 Kaj ili celis kapti lin, sed ili timis la
homamason; ĉar ili eksciis, ke li parolis la parabolon
kontraŭ ili; kaj forlasinte lin, ili foriris. 13 Kaj ili sendis
al li iujn el la Fariseoj kaj el la Herodanoj, por impliki
lin per interparolado. 14 Kaj veninte, ili diris al li:
Majstro, ni scias, ke vi estas verama kaj ne zorgas
pri iu ajn; ĉar vi ne favoras la personon de homoj,
sed instruas laŭ vero la vojon de Dio. Ĉu konvenas

doni tributon al Cezaro, aŭ ne? **15** Ĉu ni donu, aŭ ne
donu? Sed li, sciante ilian hipokritecon, diris al ili:
Kial vi provas min? alportu al mi denaron, ke mi ĝin
vidu. **16** Kaj ili ĝin alportis. Kaj li diris al ili: Kies estas
ĉi tiu bildo kaj la surskribaĵo? Kaj ili diris al li: De
Cezaro. **17** Kaj Jesuo respondis al ili: Redonu al Cezaro
la propraĵon de Cezaro, kaj al Dio la propraĵon de
Dio. Kaj ili miregis pro li. **18** Kaj venis al li Sadukeoj,
kiuj diras, ke ne estas releviĝo; kaj ili demandis lin,
dirante: **19** Majstro, Moseo skribis por ni: Se ies frato
mortos kaj postlasos edzinon kaj ne lasos infanon, la
frato de la mortinto prenu lian edzinon kaj naskigu
idaron al sia frato. **20** Estis sep fratoj; kaj la unua
prenis edzinon, kaj mortinte, ne lasis idaron; **21** kaj la
dua prenis ŝin, kaj mortis, ne lasinte idaron; kaj la tria
same; **22** kaj la sep ne lasis idaron. Laste post ĉiuj la
virino ankaŭ mortis. **23** En la releviĝo, por kiu el ili
ŝi estos edzino? ĉar ĉiuj sep havis ŝin kiel edzinon.
**24** Kaj Jesuo diris al ili: Ĉu vi ne eraras pro tio, ke vi
ne scias la Skribojn, nek la potencon de Dio? **25** Ĉar
kiam oni leviĝos el la mortintoj, oni nek edziĝas nek
edziniĝas, sed estas kiel anĝeloj en la ĉielo. **26** Sed pri
la mortintoj, ke ili releviĝas, ĉu vi ne legis en la libro
de Moseo ĉe la arbetaĵo, kiel Dio parolis al li, dirante:
Mi estas la Dio de Abraham kaj la Dio de Isaak kaj la
Dio de Jakob? **27** Li estas Dio ne de la mortintoj, sed de
la vivantoj: vi multe eraras. **28** Kaj unu el la skribistoj
alvenis kaj aŭskultis la diskutadon, kaj rimarkis, ke li
lerte respondas al ili; kaj tiu demandis lin: Kiu ordono
estas la unua el ĉiuj? **29** Kaj Jesuo respondis: La unua
estas: Aŭskultu, ho Izrael! la Eternulo, nia Dio, la
Eternulo estas unu; **30** kaj amu la Eternulon, vian
Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per
via tuta menso kaj per via tuta forto. **31** Kaj jen estas la
dua: Amu vian proksimulon kiel vin mem. Pli granda
ol ĉi tiuj ne estas alia ordono. **32** Kaj respondis al li la
skribisto: Bone, Majstro, laŭ vero vi respondis, ke Li
estas unu, kaj ne ekzistas alia krom Li; **33** kaj ami Lin
per la tuta koro kaj per la tuta intelekto kaj per la tuta
forto, kaj ami sian proksimulon kiel sin mem — tio
multe pli valoras, ol ĉiuj bruloferoj kaj pekoferoj. **34**
Kaj Jesuo, vidante, ke li respondis prudente, diris al li:
Vi ne estas malproksime de la regno de Dio. Kaj neniu
plu kuraĝis fari al li demandon. **35** Kaj responde Jesuo
diris, instruante en la templo: Kial diras la skribistoj,
ke la Kristo estas Filo de David? **36** David mem diris per
la Sankta Spirito: La Eternulo diris al mia Sinjoro: Sidu
dekstre de Mi, Ĝis Mi faros viajn malamikojn benketo
por viaj piedoj. **37** David mem nomas lin Sinjoro;
kaj kiel do li estas lia filo? Kaj la granda homamaso
aŭskultis lin plezure. **38** Kaj en sia instruado li diris:
Gardu vin kontraŭ la skribistoj, kiuj amas promenadi
en roboj kaj salutojn sur la placoj, **39** kaj ĉefseĝojn
en la sinagogoj, kaj ĉeflokojn ĉe festenoj; **40** kaj kiuj
formanĝas la domojn de vidvinoj, kaj por preteksto
ili longe preĝas; ili ricevos pli severan kondamnon.
**41** Kaj sidante kontraŭ la monkesto, li rimarkis, kiel
la homoj enĵetas monerojn en la monkeston; kaj
multaj riĉuloj enĵetis multon. **42** Kaj venis unu malriĉa
vidvino, kaj enĵetis du leptojn, kiuj faras kodranton.
**43** Kaj alvokinte al si siajn disĉiplojn, li diris al ili: Vere
mi diras al vi, ke tiu malriĉa vidvino enĵetis pli ol
ĉiuj ĵetantoj en la monkeston; **44** ĉar ili ĉiuj enĵetis el
sia abundo, sed ŝi el sia senhaveco ĵetis ĉion, kion ŝi
havis, sian tutan vivrimedon.

**13** Kaj dum li eliris el la templo, unu el liaj disĉiploj
diris al li: Majstro, jen kiaj ŝtonoj kaj kiaj
konstruaĵoj! **2** Kaj Jesuo diris al li: Ĉu vi vidas ĉi tiujn
grandajn konstruaĵojn? ne estos lasita ĉi tie ŝtono sur
ŝtono, kiu ne estos deĵetita. **3** Kaj dum li sidis sur la
monto Olivarba rekte kontraŭ la templo, Petro kaj
Jakobo kaj Johano kaj Andreo demandis lin aparte: **4**
Diru al ni, kiam tio estos? kaj kio estas la signo, kiam
ĉio tio devos plenumiĝi? **5** Kaj Jesuo ekparolis, kaj
diris al ili: Gardu vin, ke neniu vin forlogu. **6** Multaj
venos en mia nomo, dirante: Mi estas; kaj ili forlogos
multajn. **7** Kaj kiam vi aŭdos pri militoj kaj famoj
de militoj, ne maltrankviliĝu; tio devas okazi; sed
ankoraŭ ne estas la fino. **8** Ĉar leviĝos nacio kontraŭ
nacio, kaj regno kontraŭ regno; estos tertremoj en
diversaj lokoj, kaj estos malsatoj; tio estas komenco
de suferoj. **9** Sed gardu vin; ĉar oni transdonos vin
al sinedrioj, kaj en sinagogoj vi estos skurĝitaj; kaj
vi staros antaŭ provincestroj kaj reĝoj pro mi, por
atesto al ili. **10** Kaj la evangelio devas antaŭe esti
predikita al ĉiuj nacioj. **11** Kaj kiam oni forkondukos
kaj transdonos vin, ne antaŭzorgu, kion vi parolos;
sed kio ajn estos donita al vi en tiu horo, tion parolu;
ĉar la parolanto estas ne vi, sed la Sankta Spirito. **12**
Kaj frato transdonos fraton al morto, kaj patro filon;
kaj leviĝos gefiloj kontraŭ gepatroj kaj mortigos ilin.
**13** Kaj vi estos malamataj de ĉiuj pro mia nomo; sed
kiu persistos ĝis la fino, tiu estos savita. **14** Sed kiam

vi vidos la abomenindaĵon de dezerteco starantan tie,
kie ne decas (la leganto komprenu), tiam kiuj estas
en Judujo, tiuj forkuru al la montoj; 15 kaj kiu estas
sur la tegmento, tiu ne malsupreniru, nek eniru, por
preni ion el sia domo; 16 kaj kiu estas sur la kampo,
tiu ne revenu, por preni sian mantelon. 17 Sed ve al la
gravedulinoj kaj al la suĉigantinoj en tiuj tagoj! 18
Kaj preĝu, ke tio ne okazu en vintro. 19 Ĉar tiuj tagoj
estos tagoj de aflikto tia, kia ne estis de la komenco de
la kreo, kiun Dio kreis, ĝis nun, kaj neniam estos. 20
Kaj se la Eternulo ne malplilongigus la tagojn, neniu
karno estus savita; sed pro la elektitoj, kiujn Li elektis,
Li malplilongigis la tagojn. 21 Kaj tiam se iu diros al vi:
Jen ĉi tie la Kristo, aŭ, Jen tie; ne kredu; 22 ĉar leviĝos
falsaj kristoj kaj falsaj profetoj, kaj faros signojn kaj
miraklojn, por erarigi, se eble, la elektitojn. 23 Sed
gardu vin; jen mi ĉion antaŭdiris al vi. 24 Sed en tiuj
tagoj, post tiu aflikto, la suno mallumiĝos kaj la luno
ne donos sian lumon, 25 kaj la steloj falados el la ĉielo,
kaj la potencoj, kiuj estas en la ĉieloj, ŝanceliĝos. 26
Kaj tiam oni vidos la Filon de homo, venantan en
nuboj kun granda potenco kaj gloro. 27 Kaj tiam li
elsendos la anĝelojn kaj kolektos siajn elektitojn el la
kvar ventoj, de la limo de la tero ĝis la limo de la ĉielo.
28 De la figarbo lernu ĝian parabolon: kiam ĝia branĉo
jam moliĝas kaj aperigas foliojn, vi scias, ke la somero
estas proksima; 29 tiel same vi, kiam vi vidos, ke tio
okazas, tiam sciu, ke li estas proksima, ĉe la pordoj.
30 Vere mi diras al vi: Ĉi tiu generacio ne forpasos,
antaŭ ol ĉio tio fariĝos. 31 La ĉielo kaj la tero forpasos,
sed miaj vortoj ne forpasos. 32 Sed pri tiu tago kaj la
horo scias neniu, eĉ ne la anĝeloj en la ĉielo, nek la
Filo, sed nur la Patro. 33 Gardu vin, viglu kaj preĝu;
ĉar vi ne scias, kiam estos la ĝusta tempo. 34 Kiel
homo forvojaĝinta, kiu lasis sian domon kaj donis
aŭtoritaton al siaj sklavoj, al ĉiu lian propran laboron,
kaj ordonis al la pordisto, ke li viglu: 35 vi do viglu; ĉar
vi ne scias, kiam venos la domomastro, ĉu vespere, ĉu
noktomeze, ĉu ĉe la kokokrio, ĉu frumatene; 36 por ke
li ne venu subite kaj ne trovu vin dormantaj. 37 Kaj
kion mi diras al vi, tion mi diras al ĉiuj: Viglu.

**14** Kaj post du tagoj estis la Pasko kaj la festo de
macoj; kaj la ĉefpastroj kaj skribistoj serĉis,
kiamaniere ili povu per ruzo lin kapti kaj mortigi; 2
ĉar ili diris: Ne dum la festo, por ke ne estu tumulto de
la popolo. 3 Kaj dum li estis en Betania, en la domo de
Simon, la leprulo, kiam li sidis ĉe manĝo, venis virino,
havanta alabastran vazon da pura narda ŝmiraĵo, tre
multekosta; kaj rompinte la vazon, ŝi surverŝis lian
kapon. 4 Kaj iuj indignis inter si, dirante: Por kio
fariĝis ĉi tiu malŝparo de la ŝmiraĵo? 5 Ĉar ĉi tiun
ŝmiraĵon oni povus vendi por pli ol tricent denaroj,
kaj doni al malriĉuloj. Kaj ili murmuris kontraŭ ŝi.
6 Kaj Jesuo diris: Lasu ŝin; kial vi ĝenas ŝin? ŝi faris
bonan faron al mi. 7 Ĉar la malriĉulojn vi ĉiam havas
kun vi, kaj kiam ajn vi volas, vi povas bonfari al
ili; sed min vi ne ĉiam havas. 8 Kion ŝi povis, tion
ŝi faris; ŝi antaŭfaris la ŝmiron de mia korpo por
la entombigo. 9 Vere mi diras al vi: Kie ajn estos
predikata la evangelio en la tuta mondo, tio ankaŭ,
kion ŝi faris, estos priparolata, por memoraĵo de ŝi.
10 Kaj Judas Iskariota, kiu estis unu el la dek du,
foriris al la ĉefpastroj, por transdoni lin al ili. 11 Kaj
aŭdinte, ili ĝojis, kaj promesis doni al li monon. Kaj li
serĉis, kiamaniere oportune transdoni lin. 12 Kaj en
la unua tago de la macoj, kiam oni buĉis la Paskon,
liaj disĉiploj diris al li: Kien vi volas, ke ni iru, kaj
pretigu, por ke vi manĝu la Paskon? 13 Kaj li sendis
du el siaj disĉiploj, kaj diris al ili: Iru en la urbon, kaj
vin renkontos viro, portanta kruĉon da akvo; 14 lin
sekvu, kaj kien li eniros, tie diru al la domomastro:
La Majstro diras: Kie estas mia gastoĉambro, en kiu
mi manĝos la Paskon kun miaj disĉiploj? 15 Kaj li
mem montros al vi grandan supran ĉambron, prete
aranĝitan; kaj tie vi pretigu por ni. 16 Kaj foriris la
disĉiploj kaj iris en la urbon, kaj trovis tiel, kiel li diris
al ili; kaj ili pretigis la Paskon. 17 Kaj kiam vesperiĝis,
li venis kun la dek du. 18 Kaj dum ili sidis kaj manĝis,
Jesuo diris: Vere mi diras al vi, ke unu el vi perfidos
min, unu, kiu manĝas kun mi. 19 Kaj ili komencis
malĝoji, kaj diri al li unu post la alia: Ĉu eble mi? 20
Sed li diris al ili: Unu el la dek du, kiu trempas kun
mi en la pladon. 21 La Filo de homo iros, kiel estas
skribite pri li; sed ve al tiu viro, de kiu la Filo de homo
estos perfidita! Se tiu homo ne estus naskita, estus
bone por li. 22 Kaj dum ili manĝis, li prenis panon,
kaj, beninte, dispecigis ĝin kaj donis al ili, kaj diris:
Prenu; ĉi tio estas mia korpo. 23 Kaj li prenis kalikon,
kaj, doninte dankon, li donis al ili; kaj ĉiuj trinkis
el ĝi. 24 Kaj li diris al ili: Ĉi tio estas mia sango de
la interligo, kiu estas elverŝata por multaj. 25 Vere
mi diras al vi: Mi ne plu trinkos el la frukto de la
vinberarbo, ĝis tiu tago, kiam mi trinkos ĝin novan en

la regno de Dio. **26** Kaj kantinte himnon, ili foriris al la monto Olivarba. **27** Kaj Jesuo diris al ili: Vi ĉiuj ofendiĝos; ĉar estas skribite: Mi frapos la paŝtiston, kaj la ŝafoj diskuros. **28** Tamen post mia releviĝo, mi iros antaŭ vi en Galileon. **29** Sed Petro diris al li: Eĉ se ĉiuj ofendiĝos, tamen ne mi. **30** Kaj Jesuo diris al li: Vere mi diras al vi, ke hodiaŭ en ĉi tiu nokto, antaŭ ol dufoje krios koko, vi trifoje malkonfesos min. **31** Sed tre insiste li diris: Eĉ se mi devos morti kun vi, mi neniel vin malkonfesos. Kaj tiel same diris ili ĉiuj. **32** Kaj ili venis al loko, kies nomo estas Getsemane; kaj li diris al siaj disĉiploj: Sidu ĉi tie, dum mi preĝos. **33** Kaj li prenis kun si Petron kaj Jakobon kaj Johanon, kaj komencis tre konsterniĝi kaj maltrankviliĝi. **34** Kaj li diris al ili: Tre malĝoja estas mia animo, eĉ ĝis morto; restu ĉi tie, kaj viglu. **35** Kaj irinte iom antaŭen, li falis sur la teron, kaj preĝis, ke, se povas esti, la horo pasu for de li. **36** Kaj li diris: Aba, Patro, ĉio estas ebla ĉe Vi: forportu de mi ĉi tiun kalikon; tamen estu ne tio, kion mi volas, sed kion Vi volas. **37** Kaj li venis, kaj trovis ilin dormantaj, kaj diris al Petro: Simon, ĉu vi dormas? ĉu vi ne havis forton vigli eĉ unu horon? **38** Viglu kaj preĝu, por ke vi ne eniru en tenton; la spirito ja estas fervora, sed la karno estas malforta. **39** Kaj denove foririnte, li preĝis, dirante la samajn vortojn. **40** Kaj denove reveninte, li trovis ilin dormantaj, ĉar iliaj okuloj peziĝis; kaj ili ne sciis, kion respondi al li. **41** Kaj li venis la trian fojon, kaj diris al ili: Dormu nun kaj ripozu; sufiĉas; venis la horo; jen la Filo de homo estas perfidata en la manojn de pekuloj. **42** Leviĝu, ni iru; jen mia perfidanto alproksimiĝas. **43** Kaj tuj, dum li ankoraŭ parolis, venis Judas, unu el la dek du; kaj kun li homamaso kun glavoj kaj bastonoj venis de la ĉefpastroj kaj la skribistoj kaj la pliaĝuloj. **44** Kaj lia perfidanto jam antaŭe aranĝis kun ili signon, dirante: Kiun mi kisos, tiu estas li; kaptu kaj forkonduku lin garde. **45** Kaj veninte, li tuj iris al li, kaj diris: Rabeno; kaj kisis lin. **46** Kaj ili metis la manojn sur lin kaj arestis lin. **47** Sed unu el tiuj, kiuj staris apude, eltiris la glavon kaj frapis la sklavon de la ĉefpastro, kaj detranĉis al li la orelon. **48** Kaj Jesuo responde diris al ili: Ĉu vi elvenis, kvazaŭ kontraŭ rabiston, kun glavoj kaj bastonoj, por kapti min? **49** Ĉiutage mi estis inter vi en la templo, instruante, kaj vi ne arestis min; tamen, ke plenumiĝu la Skriboj. **50** Kaj ĉiuj forlasis lin kaj forkuris. **51** Kaj sekvis lin unu junulo, vestita per tolaĵo ĉirkaŭ la nuda korpo; kaj oni kaptis lin; **52** sed lasinte la tolaĵon, li forkuris nuda. **53** Kaj oni forkondukis Jesuon al la ĉefpastro; kaj kunvenis ĉe li ĉiuj ĉefpastroj kaj pliaĝuloj kaj skribistoj. **54** Kaj Petro malproksime sekvis lin ĝis interne de la korto de la ĉefpastro; kaj sidis kun la subuloj kaj sin varmigis apud la fajro. **55** Sed la ĉefpastroj kaj la tuta sinedrio serĉis ateston kontraŭ Jesuo, por lin mortigi, kaj ne trovis. **56** Ĉar multaj malvere atestis kontraŭ li, kaj iliaj atestoj ne akordiĝis. **57** Kaj elpaŝis iuj, kaj malvere atestis kontraŭ li, dirante: **58** Ni aŭdis lin diri: Mi detruos ĉi tiun sanktejon manfaritan, kaj en la daŭro de tri tagoj mi konstruos alian ne manfaritan. **59** Kaj eĉ tiel ilia atesto ne akordiĝis. **60** Kaj la ĉefpastro stariĝis en la mezo, kaj demandis Jesuon, dirante: Ĉu vi respondas nenion? kion atestas ĉi tiuj kontraŭ vi? **61** Sed li silentadis kaj respondis nenion. Denove la ĉefpastro demandis lin, kaj diris al li: Ĉu vi estas la Kristo, la Filo de la Benato? **62** Kaj Jesuo diris: Mi estas; kaj vi vidos la Filon de homo, sidantan dekstre de la Potenco kaj venantan kun la nuboj de la ĉielo. **63** Kaj la ĉefpastro disŝiris siajn vestojn, kaj diris: Pro kio ni plu bezonas atestantojn? **64** Vi aŭdis la blasfemon: kion vi opinias? Kaj ili ĉiuj juĝis lin kondamninda al morto. **65** Kaj iuj komencis kraĉi sur lin, kaj ĉirkaŭkovri lian vizaĝon, kaj vangofrapi lin, kaj diri al li: Profetu; kaj la subuloj frapis lin per la manplatoj. **66** Kaj dum Petro estis malsupre sur la korto, venis unu el la servantinoj de la ĉefpastro; **67** kaj vidante Petron sin varmigantan, ŝi rigardis lin, kaj diris: Vi ankaŭ estis kun la Nazaretano, kun tiu Jesuo. **68** Sed li malkonfesis, dirante: Mi ne scias, nek komprenas, kion vi diras; kaj li iris en la vestiblon; kaj koko kriis. **69** Kaj lin vidinte, la servantino denove komencis diri al la apudstarantoj: Tiu estas el ili. **70** Kaj li denove malkonfesis. Kaj post iom da tempo la apudstarantoj denove diris al Petro: Vere vi estas el ili, ĉar vi estas ja Galileano. **71** Kaj li komencis malbeni kaj ĵuri: Mi ne konas tiun homon, pri kiu vi parolas. **72** Kaj tuj la duan fojon koko kriis. Kaj Petro ekrememoris la vorton, kiun Jesuo diris al li: Antaŭ ol dufoje krios koko, vi trifoje malkonfesos min. Kaj pripensinte, li ekploris.

**15** Tuj matene la ĉefpastroj, farinte interkonsilon kun la pliaĝuloj kaj skribistoj kaj la tuta sinedrio, ligis Jesuon kaj forkondukis lin kaj transdonis lin al Pilato. **2** Kaj Pilato demandis lin: Ĉu vi estas la Reĝo

de la Judoj? Kaj responde li diris al li: Vi diras. 3 Kaj
la ĉefpastroj multe lin akuzis. 4 Kaj Pilato denove
lin demandis: Ĉu vi respondas nenion? vidu, pri
kiom da aferoj oni vin akuzas. 5 Sed Jesuo ankoraŭ
nenion respondis, tiel ke Pilato miris. 6 Ĉe tiu festo li
kutimis liberigi al ili unu malliberulon, iun ajn, kiun
ili pripetis. 7 Kaj estis unu, nomata Barabas, katenita
kun la ribelintoj, kiuj en la ribelo faris mortigon. 8 Kaj
suprenveninte, la homamaso komencis peti lin pri
tio, kion li kutimis fari por ili. 9 Kaj Pilato respondis
al ili, dirante: Ĉu vi volas, ke mi liberigu al vi la
Reĝon de la Judoj? 10 Ĉar li eksciis, ke pro envio la
ĉefpastroj transdonis lin. 11 Sed la ĉefpastroj instigis
la homamason, ke prefere li liberigu al ili Barabason.
12 Kaj Pilato, denove respondante, diris al ili: Kion
do mi faru al tiu, kiun vi nomas Reĝo de la Judoj?
13 Kaj ili denove ekkriis: Krucumu lin. 14 Kaj Pilato
diris al ili: Kial? kian malbonon li faris? Sed ili des pli
ekkriis: Krucumu lin. 15 Kaj Pilato, volante kontentigi
la homamason, liberigis al ili Barabason, kaj, skurĝinte
Jesuon, transdonis lin, por esti krucumita. 16 Kaj la
soldatoj forkondukis lin en la korton, kiu estas la
Pretorio, kaj kunvokis la tutan kohorton. 17 Kaj ili
vestis lin per purpuro, kaj plektinte dornan kronon,
surmetis ĝin al li; 18 kaj ili komencis aklami lin:
Saluton, Reĝo de la Judoj! 19 Kaj ili frapis lian kapon
per kano, kaj kraĉis sur lin, kaj ekgenuinte, kliniĝis al
li. 20 Kaj mokinte lin, ili demetis de li la purpuran
veston, kaj surmetis liajn proprajn vestojn. Kaj ili
elkondukis lin, por krucumi lin. 21 Kaj ili devigis al
servado unu preterpasanton, venantan de la kamparo,
Simonon, Kirenanon, patron de Aleksandro kaj Rufo,
ke li portu lian krucon. 22 Kaj ili kondukis lin al la
loko Golgota, tio estas, Loko de Kranio. 23 Kaj ili donis
al li vinon kun mirho enmiksita, sed li ne akceptis
ĝin. 24 Kaj ili krucumis lin kaj dividis inter si liajn
vestojn, ĵetante lotojn sur ili, kion ĉiu el ili ricevu. 25
Kaj estis la tria horo, kaj ili krucumis lin. 26 Kaj la
surskribo de lia akuzo estis surskribita: LA REĜO DE
LA JUDOJ. 27 Kaj kun li ili krucumis du rabistojn, unu
dekstre kaj unu maldekstre de li. 28 Kaj plenumiĝis la
Skribo, kiu diras: Kaj li estis alkalkulita al krimuloj. 29
Kaj la preterpasantoj insultis lin, balancante la kapon,
kaj dirante: Ha, ha! vi, kiu detruas la sanktejon kaj
konstruas ĝin en la daŭro de tri tagoj, 30 savu vin,
deirante de la kruco. 31 Tiel same ankaŭ la ĉefpastroj,
mokante inter si kun la skribistoj, diris: Aliajn li savis;
sin mem li ne povas savi. 32 La Kristo, la Reĝo de Izrael,
deiru ja nun de la kruco, por ke ni vidu kaj kredu. Kaj
tiuj, kiuj estis krucumitaj kun li, insultis lin. 33 Kaj
kiam venis la sesa horo, fariĝis mallumo sur la tuta
lando ĝis la naŭa horo. 34 Kaj je la naŭa horo Jesuo
kriis per laŭta voĉo: Eloi, Eloi, lama sabaĥtani; tio
estas: Mia Dio, mia Dio, kial Vi forlasis min? 35 Kaj iuj
el la apudstarantoj, aŭdinte, diris: Jen li vokas Elijan.
36 Kaj unu kuris, kaj plenigis spongon per vinagro,
kaj metinte ĝin sur kanon, donis al li trinki, dirante:
Lasu; ni vidu, ĉu venos Elija, por depreni lin. 37 Sed
Jesuo, eliginte laŭtan krion, ellasis for la spiriton. 38
Kaj la kurteno de la sanktejo disŝiriĝis en du pecojn
de supre ĝis malsupre. 39 Kaj kiam la centestro, kiu
apudstaris kontraŭ li, vidis, ke li tiamaniere ellasis for
la spiriton, li diris: Vere ĉi tiu viro estis Filo de Dio.
40 Estis ankaŭ virinoj, rigardantaj de malproksime,
inter kiuj estis Maria Magdalena, kaj Maria, la patrino
de Jakobo la malgranda kaj de Joses, kaj Salome; 41
kiuj sekvis lin, kiam li estis en Galileo, kaj servadis al
li; kaj multaj aliaj virinoj, kiuj suprenvenis kun li en
Jerusalemon. 42 Kaj kiam jam vesperiĝis, pro tio, ke
estas la Preparado, tio estas, la tago antaŭ sabato, 43
venis Jozef el Arimateo, honorinda konsilanto, kiu
mem atendadis la regnon de Dio; kaj li kuraĝe eniris
al Pilato, kaj petis la korpon de Jesuo. 44 Kaj Pilato
miris, ĉu li jam mortis; kaj alvokinte la centestron, li
demandis lin, ĉu li de longe estas mortinta. 45 Kaj
sciiĝinte de la centestro, li donis al Jozef la korpon.
46 Kaj li aĉetis tolaĵon, kaj deprenis lin kaj envolvis
lin en la tolaĵo, kaj metis lin en tombon, kiu estis
elhakita el ŝtonego; kaj li alrulis ŝtonon al la enirejo
de la tombo. 47 Kaj Maria Magdalena, kaj Maria, la
patrino de Joses, vidis, kien oni metis lin.

16 Kaj kiam la sabato jam pasis, Maria Magdalena,
kaj Maria, la patrino de Jakobo, kaj Salome aĉetis
aromaĵojn, por ke ili iru kaj ŝmiru lin. 2 Kaj tre frue
en la unua tago de la semajno ili venis al la tombo,
kiam la suno ĵus leviĝis. 3 Kaj ili diris inter si: Kiu
derulos por ni la ŝtonon de la enirejo de la tombo?
4 kaj suprenrigardante, ili vidis, ke la ŝtono estas
derulita; ĉar ĝi estis tre granda. 5 Kaj enirinte en la
tombon, ili vidis junulon sidantan ĉe la dekstra flanko,
vestitan per blanka robo; kaj ili miregis. 6 Sed li diris
al ili: Ne miregu; vi serĉas Jesuon, la Nazaretanon, la
krucumitan: li leviĝis; li ne estas ĉi tie; jen la loko,

kien oni metis lin! **7** Sed iru, diru al liaj disĉiploj kaj al
Petro: Li iras antaŭ vi en Galileon; tie vi vidos lin, kiel
li diris al vi. **8** Kaj elirinte, ili forkuris de la tombo,
ĉar tremado kaj konfuziĝo posedis ilin; kaj ili diris
nenion al iu, ĉar ili timis. **9** **(note: The most reliable and earliest
manuscripts do not include Mark 16:9-20.)** Sed leviĝinte frue en
la unua tago de la semajno, li aperis unue al Maria
Magdalena, el kiu li elpelis sep demonojn. **10** Ŝi iris,
kaj sciigis ĝin al la homoj, kiuj estis kun li, dum ili
malĝojis kaj ploris. **11** Kaj aŭdinte, ke li vivas kaj estas
vidita de ŝi, ili ne kredis. **12** Kaj post tio li aperis sub
alia formo al du el ili, dum ili piediris en la kamparon.
**13** Kaj foririnte, ili sciigis al la aliaj, kaj ankaŭ ili ne
kredis. **14** Poste li aperis al la dek unu, dum ili sidis ĉe
manĝo, kaj riproĉis ilian nekredemon kaj korobstinon,
ĉar ili ne kredis tiujn, kiuj vidis lin leviĝintan. **15** Kaj
li diris al ili: Iru en la tutan mondon, kaj prediku la
evangelion al ĉiu kreitaĵo. **16** Kiu kredos kaj estos
baptita, tiu estos savita; sed kiu ne kredos, tiu estos
kondamnita. **17** Kaj jenaj signoj sekvos la kredantojn:
en mia nomo ili elpelos demonojn; ili parolos per
lingvoj; **18** ili prenos en manojn serpentojn, kaj se
ili trinkos ion mortigan, ĝi neniel difektos ilin; sur
malsanulojn ili metos la manojn, kaj ili saniĝos. **19**
Tiam la Sinjoro Jesuo, post kiam li parolis al ili, estis
ricevita supren en la ĉielon, kaj sidiĝis dekstre de Dio.
**20** Kaj elirinte, ili predikis ĉie, kaj la Sinjoro laboris
kun ili kaj fortikigis la vorton per la signoj, kiuj sekvis.
Amen.

# Luko

**1** Ĉar multaj jam entreprenis aranĝi historion pri
la faktoj, kiuj estas konstatitaj inter ni, **2** kiel ilin
transdonis al ni tiuj, kiuj de la komenco vidis mem
kaj estis administrantoj de la vorto, **3** ŝajnis bone
ankaŭ al mi, esplorinta ĉion atente de la komenco,
skribi en ordo al vi, plej eminenta Teofilo, **4** por ke vi
povu scii la certecon pri la aferoj, pri kiuj vi estas
instruita. **5** En la tagoj de Herodo, reĝo de Judujo, estis
pastro nomata Zeĥarja, el la deĵora grupo de Abija;
kaj li havis edzinon el la filinoj de Aaron, kaj ŝia nomo
estis Elizabeto. **6** Kaj ambaŭ estis justaj antaŭ Dio,
irantaj laŭ ĉiuj ordonoj kaj instruoj de la Eternulo sen
riproĉo. **7** Kaj ili ne havis infanon, ĉar Elizabeto estis
senfrukta, kaj ili ambaŭ estis en profunda aĝo. **8** Kaj
dum li plenumis sian pastradon antaŭ Dio en la vico
de sia grupo, **9** laŭ la kutimo de la pastra ofico estis lia
loto eniri en la sanktejon de la Eternulo kaj incensadi.
**10** Kaj la tuta amaso de la popolo preĝis ekstere dum la
horo de la incensado. **11** Kaj aperis antaŭ li anĝelo de
la Eternulo, staranta dekstre de la altaro de incensado.
**12** Kaj Zeĥarja maltrankviliĝis, kiam li vidis lin, kaj
sur lin falis timo. **13** Sed la anĝelo diris al li: Ne timu,
Zeĥarja; ĉar via preĝo estas aŭdita, kaj via edzino
Elizabeto naskos al vi filon, kaj vi donos al li la nomon
Johano. **14** Kaj vi havos ĝojon kaj feliĉon, kaj multaj
ĝojos pro lia naskiĝo. **15** Ĉar li estos granda antaŭ la
Sinjoro, kaj li ne trinkos vinon nek ebriigaĵon; kaj
li estos plena de la Sankta Spirito jam de la ventro
de sia patrino. **16** Kaj multajn el la filoj de Izrael li
turnos al la Eternulo, ilia Dio. **17** Kaj li iros antaŭ Lia
vizaĝo en la spirito kaj potenco de Elija, por turni la
korojn de la patroj al la infanoj kaj la malobeemajn
al la saĝeco de la justuloj, por pretigi por la Sinjoro
popolon preparitan. **18** Kaj Zeĥarja diris al la anĝelo:
Per kio mi scios tion? ĉar mi estas maljunulo, kaj
mia edzino havas profundan aĝon. **19** Kaj la anĝelo
responde diris al li: Mi estas Gabriel, kiu staras antaŭ
Dio; kaj mi estas sendita, por paroli al vi kaj fari al vi
tiun bonan sciigon. **20** Kaj jen vi silentos kaj estos ne
kapabla paroli, ĝis la tago, kiam tio okazos, ĉar vi ne
kredis miajn vortojn, kiuj plenumiĝos siatempe. **21** Kaj
la popolo atendis Zeĥarjan, kaj miris pro lia restado
en la sanktejo. **22** Kaj kiam li elvenis, li ne povis paroli
al ili; kaj ili eksciis, ke li vidis vizion en la sanktejo; kaj
li faradis signojn al ili, kaj restis muta. **23** Kaj kiam
finiĝis la tagoj de lia pastrado, li foriris en sian domon.
**24** Kaj post tiuj tagoj lia edzino Elizabeto gravediĝis,
kaj kaŝis sin kvin monatojn, dirante: **25** Tiamaniere
agis la Eternulo rilate al mi en la tagoj, kiam Li favore
rigardis min, por forpreni mian riproĉon inter homoj.
**26** Kaj en la sesa monato la anĝelo Gabriel estis sendita
de Dio en urbon de Galileo, nomatan Nazaret, **27**
al virgulino fianĉinigita kun viro, kies nomo estis
Jozef, el la domo de David; kaj la nomo de la virgulino
estis Maria. **28** Kaj li venis al ŝi, kaj diris: Saluton al
vi la grace favorita, la Eternulo estas kun vi. **29** Sed
ŝi tre maltrankviliĝis ĉe tiu diro, kaj konsideris, kia
povas esti tiu saluto. **30** Kaj la anĝelo diris al ŝi: Ne
timu, Maria; ĉar vi trovis gracon antaŭ Dio. **31** Kaj jen
vi gravediĝos en via ventro kaj naskos filon, kaj vi
nomos lin JESUO. **32** Li estos granda, kaj estos nomata
Filo de la Plejaltulo; kaj Dio, la Eternulo, donos al li
la tronon de lia patro David; **33** kaj li reĝos super la
domo de Jakob eterne, kaj lia regno ne havos finon.
(aiōn g165) **34** Kaj Maria diris al la anĝelo: Kiel estos tio,
ĉar mi ne konas viron? **35** Kaj la anĝelo responde diris
al ŝi: La Sankta Spirito venos sur vin, kaj la potenco
de la Plejaltulo superombros vin; pro kio ankaŭ la
naskotaĵo estos nomata sankta, la Filo de Dio. **36** Kaj
jen via parencino Elizabeto ankaŭ gravediĝis je filo
en sia maljuneco, kaj la nuna monato estas la sesa
por ŝi, kiun oni nomis senfrukta. **37** Ĉar ĉe Dio nenio
estas neebla. **38** Kaj Maria diris: Jen la sklavino de
la Eternulo; estu al mi laŭ via diro. Kaj la anĝelo
foriris de ŝi. **39** Kaj en tiuj tagoj Maria leviĝis kaj
senprokraste vojaĝis en la montan regionon, en urbon
de Judujo; **40** kaj enirinte en la domon de Zeĥarja,
ŝi salutis Elizabeton. **41** Kaj kiam Elizabeto aŭdis la
saluton de Maria, la infaneto eksaltis en ŝia ventro; kaj
Elizabeto pleniĝis de la Sankta Spirito, **42** kaj ŝi levis
sian voĉon per laŭta krio, kaj diris: Benata vi estas
inter virinoj, kaj benata estas la frukto de via ventro.
**43** Kaj pro kio okazas al mi ĉi tio, ke la patrino de mia
Sinjoro venas al mi? **44** Ĉar jen kiam la voĉo de via
saluto venis en miajn orelojn, la infaneto ĝoje eksaltis
en mia ventro. **45** Kaj feliĉa estas ŝi, kiu kredis, ĉar
plenumiĝos tio, kio estas dirita al ŝi de la Eternulo. **46**
Kaj Maria diris: Mia animo altigas la Eternulon, **47** Kaj
mia spirito ĝojis en Dio, mia Savanto, **48** Ĉar Li rigardis
la humilecon de Sia sklavino; Ĉar jen de nun ĉiuj
generacioj nomos min feliĉa. **49** Ĉar la Potenculo faris
al mi grandaĵojn, Kaj sankta estas Lia nomo. **50** Kaj

Lia boneco estas por ĉiuj generacioj Al tiuj, kiuj Lin
timas. 51 Li montris forton per Sia brako, Li dispelis
fierulojn en la penso de ilia koro. 52 Li malaltigis
potenculojn de iliaj tronoj, Kaj Li altigis humilulojn.
53 Malsatulojn Li plenigis per bonaĵo, Kaj riĉulojn Li
forsendis malplenaj. 54 Li helpis Sian servanton Izrael,
Memorante Sian korfavoron. 55 Kiel Li parolis al niaj
patroj, Al Abraham kaj al lia idaro eterne. (aiōn g165)
56 Kaj Maria loĝis ĉi ŝi tri monatojn, kaj reiris al sia
domo. 57 Kaj venis por Elizabeto la tempo, en kiu ŝi
devis naski; kaj ŝi naskis filon. 58 Kaj ŝiaj najbaroj kaj
ŝiaj parencoj aŭdis, ke la Eternulo pligrandigis Sian
bonecon al ŝi; kaj ili ĝojis kun ŝi. 59 Kaj en la oka tago
oni venis, por cirkumcidi la infaneton; kaj ili eknomis
lin Zeĥarja, laŭ la nomo de lia patro. 60 Kaj lia patrino
responde diris: Tute ne; sed li estos nomata Johano.
61 Kaj ili diris al ŝi: El via parencaro estas neniu, kiu
estas nomata per tiu nomo. 62 Kaj ili faris signojn al
lia patro pri tio, kiel li volas, ke li estu nomata. 63
Kaj li petis tabuleton, kaj skribis jene: Lia nomo estas
Johano. Kaj ĉiuj miris. 64 Kaj tuj lia buŝo malfermiĝis,
kaj lia lango liberiĝis; kaj li parolis, glorante Dion. 65
Kaj timo venis sur ĉiujn, kiuj loĝis ĉirkaŭ ili, kaj tra
la tuta monta regiono de Judujo disvastiĝis rakonto
pri ĉio tio. 66 Kaj ĉiuj aŭdantoj konservis tion en sia
koro, dirante: Kia do estos ĉi tiu knabeto? Ĉar la mano
de la Eternulo estis kun li. 67 Kaj lia patro Zeĥarja
pleniĝis de la Sankta Spirito, kaj profetis, dirante: 68
Benata estu la Eternulo, la Dio de Izrael, Ĉar Li vizitis
Sian popolon kaj faris por ili elaĉeton, 69 Kaj levis
kornon de savo por ni En la domo de Sia servanto
David, 70 Kiel Li parolis per la buŝo de Siaj sanktaj
profetoj, de post la komenco de la mondo, (aiōn g165)
71 Savadon el niaj malamikoj kaj el la mano de ĉiuj
niaj malamantoj; 72 Por montri Sian bonecon ĉe niaj
patroj, Kaj por memori Sian sanktan interligon; 73
La ĵuron, kiun Li ĵuris al nia patro Abraham; 74 Ke Li
donos al ni, ke, liberigite el la mano de niaj malamikoj,
Ni servu Lin sentime, 75 En sankteco kaj justeco antaŭ
Li ĉiujn niajn tagojn. 76 Kaj vi, infano, estos nomata
profeto de la Plejaltulo, Ĉar vi iros antaŭ la vizaĝo de
la Sinjoro, por pretigi liajn vojojn, 77 Por doni al lia
popolo scion de savo En la pardonado de iliaj pekoj,
78 Pro la kompata koro de nia Dio, Per kiu nin vizitis
la sunleviĝo de supre, 79 Por lumi sur tiujn, kiuj sidas
en mallumo kaj en la ombro de morto, Por gvidi niajn
piedojn en la vojojn de paco. 80 Kaj kreskis la infano
kaj fortiĝis en spirito, kaj estis en la dezertoj ĝis la
tago de sia ekmontriĝo al Izrael.

2 Kaj en tiuj tagoj eliris dekreto de Cezaro Aŭgusto,
ke la tuta mondo estu registrita. 2 Ĉi tiu estis la
unua registrado, farita, kiam Kirenio estis reganto
de Sirio. 3 Kaj ĉiuj iris, por esti registritaj, ĉiu al sia
urbo. 4 Kaj Jozef ankaŭ supreniris el Galileo, el la urbo
Nazaret, en Judujon, al la urbo de David, kiu estas
nomata Bet-Leĥem, ĉar li estis el la domo kaj familio
de David, 5 por esti registrita kun sia fianĉino Maria,
kiu estis graveda. 6 Kaj dum ili estis tie, venis la tagoj
por ŝia akuŝo. 7 Kaj ŝi naskis sian unuan filon, kaj
ŝi ĉirkaŭvindis lin kaj kuŝigis lin en staltrogon, ĉar
ne estis loko por ili en la gastejo. 8 Kaj en tiu sama
regiono estis paŝtistoj, kiuj kamploĝis kaj nokte gardis
sian gregon. 9 Kaj anĝelo de la Eternulo alstaris apud
ili, kaj la gloro de la Eternulo brilis ĉirkaŭ ili, kaj ili
timis per granda timo. 10 Kaj la anĝelo diris al ili:
Ne timu; ĉar jen mi venigas al vi bonan sciigon de
granda ĝojo, kiu estos al la tuta popolo; 11 ĉar hodiaŭ
estas naskita por vi, en la urbo de David, Savanto,
kiu estas Kristo, la Sinjoro. 12 Kaj jen la signo por vi:
vi trovos infaneton, ĉirkaŭvinditan kaj kuŝantan en
staltrogo. 13 Kaj subite estis kun la anĝelo amaso de
la ĉiela armeo, laŭdante Dion, kaj dirante: 14 Gloro
al Dio en la supera alto, Kaj sur la tero paco, inter
homoj Difavoro. 15 Kaj kiam la anĝeloj foriris de ili
en la ĉielon, la paŝtistoj diris unu al alia: Ni jam iru
ĝis Bet-Leĥem, kaj vidu ĉi tiun okazintaĵon, kiun la
Eternulo sciigis al ni. 16 Kaj rapidante, ili iris, kaj
trovis Marian kaj Jozefon, kaj la infaneton kuŝantan
en la staltrogo. 17 Kaj tion vidinte, ili sciigis pri la
diro, kiu estis parolita al ili pri ĉi tiu infano. 18 Kaj ĉiuj
aŭdintoj miris pri tio, kion rakontis al ili la paŝtistoj.
19 Sed Maria konservis ĉiujn tiujn dirojn kaj pripensis
ilin en sia koro. 20 Kaj la paŝtistoj revenis, glorante
kaj laŭdante Dion pri ĉio, kion ili aŭdis kaj vidis, kiel
estis parolite al ili. 21 Kaj kiam jam pasis ok tagoj por
cirkumcidi lin, oni donis al li la nomon JESUO, kiel
li estis nomita de la anĝelo, antaŭ ol li estis en la
ventro. 22 Kaj kiam finiĝis la tagoj de ilia purigado
laŭ la leĝo de Moseo, ili alportis lin al Jerusalem, por
prezenti lin al la Eternulo, 23 kiel estas skribite en
la leĝo de la Eternulo: Ĉiu virseksulo, kiu malfermas
la uteron, estu dediĉita al la Eternulo; 24 kaj por
alporti oferon laŭ tio, kio estas dirita en la leĝo de la

Eternulo: Paron da turtoj, aŭ du kolombidojn. 25 Kaj
jen en Jerusalem estis viro, kies nomo estis Simeon,
kaj ĉi tiu estis justa kaj pia, atendanta la konsoladon
de Izrael; kaj la Sankta Spirito estis kun li. 26 Kaj estis
montrite al li de la Sankta Spirito, ke li ne mortos,
ĝis li vidos la Kriston de la Eternulo. 27 Kaj li venis
per la Spirito en la templon; kaj kiam la gepatroj
enportis la infanon Jesuo, por fari pri li laŭ la kutimo
de la leĝo, 28 tiam li ricevis lin en siajn brakojn, kaj
benis Dion, dirante: 29 Nun, ho Eternulo, Vi ellasas
Vian servanton, Laŭ Via vorto, en paco, 30 Ĉar miaj
okuloj vidis Vian savon, 31 Kiun Vi preparis antaŭ
la vizaĝo de ĉiuj popoloj, 32 Lumon por malkaŝo al
la gentoj, Kaj gloron de Via popolo Izrael. 33 Kaj lia
patro kaj lia patrino miris pri tio, kio estis parolita
pri li; 34 kaj Simeon ilin benis, kaj diris al Maria, lia
patrino: Jen ĉi tiu estas metita por la falo kaj leviĝo
de multaj en Izrael, kaj por signo kontraŭparolata;
35 kaj ankaŭ vian animon glavo trapasos; por ke la
pensoj de multaj koroj malkaŝiĝu. 36 Kaj estis unu
profetino, Anna, filino de Fanuel, el la tribo de Aŝer
(ŝi estis grandaĝa, loĝinte sep jarojn kun sia edzo de
post sia virgeco, 37 kaj estinte vidvino okdek kvar
jarojn), kiu neniam foriris el la templo, adorante per
fastoj kaj preĝoj nokte kaj tage. 38 Kaj alveninte ĝuste
en tiu horo, ŝi dankis Dion, kaj parolis pri li al ĉiuj,
kiuj atendadis la elaĉeton de Jerusalem. 39 Kaj kiam
ili jam faris ĉion, konforme al la leĝo de la Eternulo,
ili revenis en Galileon, al sia urbo Nazaret. 40 Kaj la
infano kreskadis kaj fortiĝis, pleniĝante de saĝeco;
kaj la graco de Dio estis sur li. 41 Kaj liaj gepatroj iris
ĉiujare al Jerusalem ĉe la Paska festo. 42 Kaj kiam li
estis dekdujara, ili supreniris laŭ la kutimo de la festo;
43 kaj kiam ili jam pasigis la tagojn, ĉe ilia returniĝo la
knabo Jesuo restis en Jerusalem, kaj liaj gepatroj tion
ne sciis; 44 sed supozante, ke li estas en la karavano, ili
iris tagan vojaĝon, kaj serĉis lin inter siaj parencoj kaj
konatoj; 45 kaj ne trovinte lin, ili reiris al Jerusalem,
serĉante lin. 46 Kaj post tri tagoj ili trovis lin en la
templo, kie li sidis meze de la instruistoj, aŭskultante
ilin kaj metante al ili demandojn; 47 kaj ĉiuj, kiuj aŭdis
lin, miregis pro lia kompreno kaj liaj respondoj. 48 Kaj
ili miris, vidante lin, kaj lia patrino diris al li: Filo, kial
vi tiel agis kontraŭ ni? jen via patro kaj mi serĉis vin
kun malĝojo. 49 Kaj li diris al ili: Kial vi serĉis min? ĉu
vi ne sciis, ke mi devas esti en la domo de mia Patro?
50 Kaj ili ne komprenis la diron, kiun li parolis al ili. 51
Kaj li malsupreniris kun ili, kaj venis en Nazareton,
kaj li estis obeema al ili; kaj lia patrino konservis ĉiujn
tiujn dirojn en sia koro. 52 Kaj Jesuo progresis en
saĝeco kaj staturo, kaj en graco ĉe Dio kaj homoj.

3 En la dek-kvina jaro de la regado de Tiberio Cezaro,
kiam Pontio Pilato estis provincestro de Judujo,
kaj Herodo estis tetrarĥo de Galileo, kaj lia frato
Filipo tetrarĥo de la regiono Iturea kaj Traĥonitis,
kaj Lisanio tetrarĥo de Abilene, 2 dum la ĉefpastreco
de Anas kaj Kajafas, venis la vorto de Dio al Johano,
filo de Zeĥarja, en la dezerto. 3 Kaj li venis en la
tutan regionon ĉirkaŭ Jordan, predikante la bapton de
pento por la pardonado de pekoj, 4 kiel estas skribite
en la libro de la vortoj de la profeto Jesaja: Voĉo de
krianto en la dezerto: Pretigu la vojon de la Eternulo,
Rektigu Liajn irejojn. 5 Ĉiu valo leviĝos, Kaj ĉiu monto
kaj monteto malaltiĝos, Kaj la malebenaĵo fariĝos
ebenaĵo, Kaj la malglataj vojoj glatiĝos; 6 Kaj ĉiu karno
vidos la savon de Dio. 7 Li do diris al la homamasoj,
kiuj eliris, por esti baptitaj de li: Ho vipuridoj! kiu
vin avertis forkuri de la venonta kolero? 8 Donu do
fruktojn taŭgajn por pento. Kaj ne komencu diri en vi:
Ni havas Abrahamon kiel patron; ĉar mi diras al vi, ke
Dio povas el ĉi tiuj ŝtonoj starigi idojn al Abraham. 9
Kaj la hakilo jam kuŝas ĉe la radiko de la arboj; tial ĉiu
arbo, kiu ne donas bonan frukton, estas dehakata, kaj
ĵetata en fajron. 10 Kaj la homamasoj lin demandis,
dirante: Kion do ni faru? 11 Kaj responde li diris al
ili: Kiu havas du tunikojn, tiu donu al la nehavanto;
kaj kiu havas manĝaĵon, tiu faru tiel same. 12 Venis
ankaŭ impostistoj, por esti baptitaj, kaj ili diris al li:
Majstro, kion ni faru? 13 Kaj li diris al ili: Ne postulu
pli multe, ol estas ordonite. 14 Kaj ankaŭ soldatoj
lin demandis, dirante: Kaj kion ni faru? Kaj li diris
al ili: Ne perfortu iun, nek maljuste ion postulu, kaj
estu kontentaj je via salajro. 15 Kaj kiam la popolo
atendis, kaj ĉiuj diskutis en siaj koroj pri Johano, ĉu
eble li estas la Kristo, 16 Johano respondis al ĉiuj,
dirante: Mi ja vin baptas per akvo, sed venas tiu,
kiu estas pli potenca ol mi; la rimenon de liaj ŝuoj
mi ne estas inda malligi; li vin baptos per la Sankta
Spirito kaj per fajro; 17 lia ventumilo estas en lia
mano, por ke li elpurigu sian draŝejon, kaj kolektu la
tritikon en sian grenejon; sed la grenventumaĵon li
bruligos per fajro neestingebla. 18 Kaj per multaj aliaj
konsiloj li evangeliis al la popolo. 19 Sed Herodo, la

tetrarĤo, riproĉite de li pri Herodias, la edzino de lia
frato, kaj pri ĉiuj malbonaĵoj, kiujn Herodo faris, **20**
aldonis al ĉio ankaŭ ĉi tion, ke li enŝlosis Johanon en
malliberejo. **21** Kaj kiam la tuta popolo estis baptata,
Jesuo ankaŭ estis baptita, kaj dum li preĝis, la ĉielo
malfermiĝis, **22** kaj la Sankta Spirito malsupreniris
sur lin en korpa aspekto kiel kolombo; kaj venis voĉo
el la ĉielo: Vi estas Mia Filo, la amata; en vi Mi havas
plezuron. **23** Kaj Jesuo mem, komencante, havis ĉirkaŭ
tridek jarojn, estante filo (kiel oni supozis) de Jozef,
de Eli, **24** de Mattat, de Levi, de MelĤi, de Janaj, de
Jozef, **25** de Matatias, de Amos, de NaĤum, de Esli, de
Nagaj, **26** de Maat, de Matatias, de Semein, de Jozef,
de Joda, **27** de JoĤanan, de Resa, de Zerubabel, de
Ŝealtiel, de Neri, **28** de MelĤi, de Adi, de Kosam, de
Elmodam, de Er, **29** de Jesu, de Eliezer, de Jorim, de
Mattat, de Levi, **30** de Simeon, de Jehuda, de Jozef, de
Jonam, de Eljakim, **31** de Melea, de Mena, de Matata,
de Natan, de David, **32** de Jiŝaj, de Obed, de Boaz,
de Salma, de NaĤŝon, **33** de Aminadab, de Ram, de
Ĥecron, de Perec, de Jehuda, **34** de Jakob, de Isaak, de
Abraham, de TeraĤ, de NaĤor, **35** de Serug, de Reu, de
Peleg, de Eber, de ŜelaĤ, **36** de Kenan, de ArpaĤŝad, de
Ŝem, de Noa, de LemeĤ, **37** de MetuŝelaĤ, de ĤanoĤ,
de Jared, de Mahalalel, de Kenan, **38** de Enoŝ, de Set,
de Adam, de Dio.

**4** Kaj Jesuo, plena de la Sankta Spirito, revenis de
Jordan, kaj estis kondukata de la Spirito en la
dezerton **2** dum kvardek tagoj, tentate de la diablo.
Kaj li manĝis nenion en tiuj tagoj; kaj kiam ili finiĝis,
li malsatis. **3** Kaj la diablo diris al li: Se vi estas Filo
de Dio, ordonu al ĉi tiu ŝtono, ke ĝi fariĝu pano. **4**
Kaj Jesuo respondis al li: Estas skribite: Ne per la
pano sole vivos homo. **5** Kaj kondukinte lin supren, li
montris al li ĉiujn regnojn de la mondo en momento
da tempo. **6** Kaj la diablo diris al li: Mi donos al vi la
tutan ĉi tiun potencon kaj ilian gloron; ĉar ĝi estas
transdonita al mi, kaj al kiu ajn mi volas, al tiu mi ĝin
donas. **7** Se do vi adorkliniĝos antaŭ mi, ĉio estos via.
**8** Kaj responde Jesuo diris al li: Estas skribite: Al la
Eternulo, via Dio, adorkliniĝu, kaj al Li sola servu. **9**
Kaj li kondukis lin al Jerusalem, kaj starigis lin sur
la tegmenta pinto de la templo, kaj diris al li: Se vi
estas Filo de Dio, ĵetu vin de ĉi tie malsupren; **10**
ĉar estas skribite: Al siaj anĝeloj Li ordonos pri vi,
ke ili vin gardu, **11** kaj: Sur la manoj ili vin portos,
Por ke vi ne falpuŝiĝu sur ŝtono per via piedo. **12** Kaj
responde Jesuo diris al li: Estas dirite: Ne provu la
Eternulon, vian Dion. **13** Kaj fininte la tutan tentadon,
la diablo foriris de li ĝis estonta tempo. **14** Kaj revenis
Jesuo en la potenco de la Spirito en Galileon; kaj eliris
famo pri li tra la tuta ĉirkaŭaĵo. **15** Kaj li instruadis
en iliaj sinagogoj, glorate de ĉiuj. **16** Kaj li venis al
Nazaret, kie li estis edukita; kaj laŭ sia kutimo li eniris
en la sinagogon en la sabata tago, kaj stariĝis, por
legi. **17** Kaj estis donita al li libro de la profeto Jesaja.
Kaj, malferminte la libron, li trovis la lokon, kie estis
skribite: **18** La spirito de la Eternulo estas sur mi, Ĉar Li
min sanktoleis, por bonanonci al malriĉuloj; Li sendis
min, por anonci liberecon al kaptitoj Kaj vidpovon al
blinduloj, Por meti la vunditojn en liberecon, **19** Por
proklami favorjaron de la Eternulo. **20** Kaj kunvolvinte
la libron, kaj redoninte ĝin al la subulo, li sidiĝis; kaj
la okuloj de ĉiuj en la sinagogo atente lin rigardis. **21**
Kaj li ekparolis al ili: Hodiaŭ tiu skribo plenumiĝas
en viaj oreloj. **22** Kaj ĉiuj atestis pri li, kaj miris pro
la vortoj de graco, kiuj eliris el lia buŝo; kaj ili diris:
Ĉu ĉi tiu ne estas la filo de Jozef? **23** Kaj li diris al ili:
Sendube vi diros al mi la jenan sentencon: Kuracisto,
sanigu vin mem; kiajn aferojn, pri kiuj ni aŭdis, en
Kapernaum faritajn, tiajn faru ĉi tie en via patrujo. **24**
Kaj li diris: Vere mi diras al vi: Neniu profeto estas
akceptata en sia patrujo. **25** Kun vereco mi diras al
vi: Estis multaj vidvinoj en Izrael en la tagoj de Elija,
kiam estis ŝlosita la ĉielo tri jarojn kaj ses monatojn,
kiam okazis granda malsato sur la tuta lando; **26** kaj
al neniu el ili Elija estis sendita, krom al Carfat en
la lando Cidon, al virino vidvino. **27** Kaj estis multaj
lepruloj en Izrael en la tagoj de la profeto Eliŝa; sed
neniu el ili estis purigita, krom Naaman, la Siriano. **28**
Kaj ĉiuj en la sinagogo pleniĝis de kolero, aŭdante
tion; **29** kaj leviĝinte, ili elĵetis lin ekster la urbon, kaj
kondukis lin ĝis la krutaĵo de la monteto, sur kiu ilia
urbo estis konstruita, por ĵeti lin malsupren. **30** Sed li
foriris, trapasinte tra ilia mezo. **31** Kaj li malsupreniris
al Kapernaum, urbo Galilea. Kaj li instruis ilin en la
sabato; **32** kaj oni miris pro lia instruado, ĉar kun
aŭtoritato estis lia vorto. **33** Kaj en la sinagogo estis
viro, havanta spiriton de malpura demono; kaj li
kriegis per laŭta voĉo, **34** dirante: Ha! kio estas inter
ni kaj vi, Jesuo Nazaretano? Ĉu vi venis, por pereigi
nin? Mi scias, kiu vi estas, la Sanktulo de Dio. **35** Kaj
Jesuo severe admonis lin, dirante: Silentu, kaj eliru

el li. Kaj ĵetinte lin en la mezon, la demono eliris el
li, neniel difektinte lin. 36 Kaj falis miro sur ĉiujn,
kaj ili kunparoladis inter si, dirante: Kia vorto estas
ĉi tio? ĉar kun aŭtoritato kaj potenco li ordonas al
la malpuraj spiritoj, kaj ili eliras. 37 Kaj famo pri li
eliris al ĉiu loko de la tuta ĉirkaŭaĵo. 38 Kaj leviĝinte
el la sinagogo, li eniris en la domon de Simon. Kaj la
bopatrino de Simon estis tenata de granda febro, kaj
ili petis lin pri ŝi. 39 Kaj starante super ŝi, li admonis
la febron; kaj ĝi forlasis ŝin, kaj ŝi tuj leviĝis kaj servis
al ili. 40 Kaj ĉe la subiro de la suno ĉiuj, kiuj havis
malsanulojn kun diversaj malsanoj, venigis ilin al
li; kaj li metis sur ĉiun el ili la manojn, kaj sanigis
ilin. 41 Eliris ankaŭ demonoj el multaj, kriegante, kaj
dirante: Vi estas la Filo de Dio. Kaj severe admonante,
li ne permesis al ili paroli, ĉar ili sciis, ke li estas
la Kristo. 42 Kaj kiam tagiĝis, li eliris, kaj venis en
dezertan lokon; kaj la homamasoj lin serĉis, kaj venis
al li, kaj lin detenis, ke li ne foriru de ili. 43 Sed li diris
al ili: Ankaŭ al la ceteraj urboj mi devas prediki la
evangelion de la regno de Dio; ĉar por tio mi estas
sendita. 44 Kaj li predikis en la sinagogoj de Galileo.

**5** Kaj dum la homamaso ĉirkaŭpremis lin kaj aŭskultis
la vorton de Dio, li staris apud la lago Genesaret; 2
kaj li vidis du ŝipetojn starantajn apud la lago, sed la
fiŝkaptistoj ĵus eliris el ili, kaj lavis la retojn. 3 Kaj li
eniris en unu el la ŝipetoj, kiu apartenis al Simon, kaj
petis, ke li forŝovu iom for de la bordo. Kaj li sidiĝis,
kaj instruis la homamason el la ŝipeto. 4 Kaj kiam li
ĉesis paroli, li diris al Simon: Forŝovu ĝis la profundo,
kaj mallevu la retojn por akirado. 5 Kaj responde
Simon diris: Estro, ni jam laboris la tutan nokton
kaj kaptis nenion; tamen laŭ via diro mi mallevos la
retojn. 6 Kaj tion farinte, ili enfermis grandan amason
da fiŝoj, kaj iliaj retoj ekrompiĝis; 7 kaj ili geste signis
al siaj kompanianoj en la alia ŝipeto, ke ili venu kaj
helpu ilin. Kaj ili venis, kaj plenigis ambaŭ ŝipetojn,
ĝis ekprofundiĝo. 8 Sed Simon Petro, tion vidinte,
falis teren antaŭ la genuoj de Jesuo, dirante: Foriru
de mi, ho Sinjoro, ĉar mi estas pekulo. 9 Ĉar pro la
preno de fiŝoj, kiun ili akiris, miro kaptis lin, kaj ĉiujn,
kiuj estis kun li, 10 kaj tiel same Jakobon kaj Johanon,
filojn de Zebedeo, kiuj estis kompanianoj de Simon.
Kaj Jesuo diris al Simon: Ne timu; de nun vi estos
kaptisto de homoj. 11 Kaj kiam ili surbordigis siajn
ŝipetojn, ili forlasis ĉion, kaj sekvis lin. 12 Kaj dum li
estis en unu el la urboj, jen viro plena de lepro; kaj
vidante Jesuon, li falis sur la vizaĝon kaj petegis lin,
dirante: Sinjoro, se vi volas, vi povas min purigi. 13 Kaj
li etendis la manon kaj tuŝis lin, dirante: Mi volas; estu
purigita. Kaj tuj la lepro foriris de li. 14 Kaj li ordonis
al li, ke li diru al neniu: Sed foririnte, montru vin al la
pastro kaj tiele oferu pro via purigado, kiel ordonis
Moseo, por atesto al ili. 15 Sed la famo pri li des pli
multe disvastiĝis; kaj grandaj homamasoj kunvenis,
por aŭskulti kaj por esti sanigitaj je siaj malsanoj. 16
Sed li fortiris sin en la dezertojn, kaj preĝadis. 17
Kaj en unu el tiuj tagoj li estis instruanta; kaj ĉeestis
Fariseoj kaj leĝinstruistoj, sidantaj, kiuj alvenis el ĉiu
vilaĝo de Galileo kaj el Judujo kaj el Jerusalem; kaj la
potenco de la Eternulo alestis, por sanigi ilin. 18 Kaj
jen viroj alportis sur lito viron, kiu estis paralizita;
kaj ili penis enporti lin kaj meti lin antaŭ li. 19 Kaj
ne trovinte, kiamaniere ili povas enporti lin, pro
la homamaso, ili supreniris sur la tegmenton, kaj
mallevis lin tra la tegoloj, kun la liteto, en la mezon
antaŭ Jesuo. 20 Kaj vidante ilian fidon, li diris: Ho viro,
viaj pekoj estas al vi pardonitaj. 21 Kaj la skribistoj
kaj Fariseoj komencis diskuti inter si, dirante: Kiu
estas ĉi tiu, kiu parolas blasfemojn? kiu povas pardoni
pekojn krom Dio sola? 22 Sed Jesuo, eksciante iliajn
pensojn, responde diris al ili: Kial vi diskutas en viaj
koroj? 23 Kio estas pli facila, diri: Viaj pekoj estas
al vi pardonitaj, aŭ diri: Leviĝu kaj piediru? 24 Sed
por ke vi sciu, ke la Filo de homo havas aŭtoritaton
sur la tero pardoni pekojn — li diris al la paralizulo:
Mi diras al vi: Leviĝu, kaj prenu vian liteton, kaj iru
al via domo. 25 Kaj tuj li leviĝis antaŭ ili, kaj prenis
tion, sur kio li kuŝis, kaj iris al sia domo, glorante
Dion. 26 Kaj mirego kaptis ĉiujn, kaj li gloris Dion;
kaj ili pleniĝis de timo, dirante: Ni vidis mirindaĵojn
hodiaŭ. 27 Kaj post tio li eliris, kaj vidis impostiston,
nomatan Levi, sidantan ĉe la impostejo, kaj diris al li:
Sekvu min. 28 Kaj li forlasis ĉion, kaj leviĝis, kaj sekvis
lin. 29 Kaj Levi faris grandan festenon por li en sia
domo, kaj estis granda amaso da impostistoj kaj aliaj,
kiuj sidis ĉe manĝo kun ili. 30 Kaj la Fariseoj kaj iliaj
skribistoj murmuris kontraŭ liaj disĉiploj, dirante:
Kial vi manĝas kaj trinkas kun impostistoj kaj pekuloj?
31 Kaj Jesuo responde diris al ili: Ne la sanuloj bezonas
kuraciston, sed la malsanuloj. 32 Mi venis, por alvoki
ne justulojn, sed pekulojn al pento. 33 Kaj ili diris al li:
La disĉiploj de Johano ofte fastas kaj faras preĝojn,

kaj tiel same ankaŭ la disĉiploj de la Fariseoj; sed la
viaj manĝas kaj trinkas. 34 Kaj Jesuo diris al ili: Ĉu vi
povas igi la filojn de la edziĝejo fasti, dum la fianĉo
estas kun ili? 35 Sed venos tagoj; kaj kiam la fianĉo
estos prenita for de ili, tiam ili fastos en tiuj tagoj.
36 Kaj li ankaŭ parolis al ili parabolon: Neniu ŝiras
pecon el nova vesto kaj alkudras ĝin sur malnovan
veston; ĉar alie li ŝirus la novan, kaj ankaŭ la flikaĵo el
la nova ne harmonius kun la malnova. 37 Kaj neniu
enverŝas novan vinon en malnovajn felsakojn; ĉar
alie la nova vino krevigus la felsakojn, kaj ĝi mem
elfluus, kaj la felsakoj detruiĝus. 38 Sed novan vinon
oni devas enverŝi en novajn felsakojn. 39 Kaj neniu,
trinkinte malnovan vinon, deziras novan; ĉar li diras:
La malnova estas preferinda.

**6** Kaj en sabato li iris tra la grenkampoj, kaj liaj
disĉiploj deŝiris la spikojn, kaj manĝis, frotante
ilin en la manoj. 2 Sed iuj el la Fariseoj diris: Kial vi
faras tion, kion fari en sabato ne estas permesate? 3
Kaj Jesuo, respondante al ili, diris: Ĉu vi eĉ ne legis,
kion faris David, kiam malsatis li kaj liaj kunuloj?
4 ke li eniris en la domon de Dio, kaj prenis kaj
manĝis kaj donis ankaŭ al siaj kunuloj la panojn de
propono, kiujn manĝi ne estas permesate, krom nur
al la pastroj? 5 Kaj li diris al ili: La Filo de homo estas
sinjoro de la sabato. 6 Kaj en alia sabato li eniris en
la sinagogon kaj instruadis; kaj tie estis viro, kies
dekstra mano estis velkinta. 7 Kaj la skribistoj kaj
Fariseoj observis lin atente, ĉu li sanigos en la sabato,
por ke ili trovu, kiel lin akuzi. 8 Sed li sciis iliajn
pensojn, kaj li diris al la viro, kiu havis la manon
velkintan: Leviĝu, kaj stariĝu en la mezo. Kaj li leviĝis
kaj stariĝis. 9 Kaj Jesuo diris al ili: Mi vin demandas:
ĉu estas permesate bonfari en sabato, aŭ malbonfari?
Savi vivon, al ĝin pereigi? 10 Kaj ĉirkaŭrigardinte
ĉiujn, li diris al li: Etendu vian manon. Kaj li tion
faris, kaj lia mano resaniĝis. 11 Sed ili pleniĝis de
frenezo, kaj interparoladis inter si, kion ili faru al
Jesuo. 12 Kaj en tiuj tagoj li foriris sur la monton, por
preĝi; kaj li pasigis la tutan nokton en preĝado al
Dio. 13 Kaj kiam tagiĝis, li alvokis siajn disĉiplojn, kaj
elektis el ili dek du, kiujn li ankaŭ nomis apostoloj: 14
Simonon, kiun li ankaŭ nomis Petro, kaj Andreon,
lian fraton, kaj Jakobon kaj Johanon kaj Filipon kaj
Bartolomeon 15 kaj Mateon kaj Tomason, kaj Jakobon,
filon de Alfeo, kaj Simonon, nomatan Fervorulo, 16 kaj
Judason de Jakobo, kaj Judason Iskariotan, kiu fariĝis
perfidulo. 17 Kaj li malsupreniris kun ili, kaj staris
sur ebena loko, kaj granda amaso de liaj disĉiploj,
kaj granda nombro de la popolo el la tuta Judujo kaj
Jerusalem, kaj el la marbordo de Tiro kaj Cidon, kiuj
alvenis, por aŭskulti lin kaj saniĝi je siaj malsanoj; 18
kaj tiuj, kiuj estis turmentataj de malpuraj spiritoj,
estis sanigitaj. 19 Kaj la tuta homamaso volis tuŝi lin,
ĉar potenco eliris el li kaj sanigis ĉiujn. 20 Kaj li levis
siajn okulojn al siaj disĉiploj, kaj diris: Feliĉaj estas vi
malriĉuloj, ĉar via estas la regno de Dio. 21 Feliĉaj
estas vi, kiuj nun malsatas, ĉar vi satiĝos. Feliĉaj estas
vi, kiuj nun ploras, ĉar vi ridos. 22 Feliĉaj vi estas,
kiam oni vin malamos kaj vin izolos kaj vin riproĉos,
kaj elĵetos vian nomon kial malbonan, pro la Filo de
homo. 23 Ĝoju en tiu tago, kaj pro ĝojo saltu, ĉar jen
via rekompenco estas granda en la ĉielo; ĉar tiel same
faris iliaj patroj kontraŭ la profetoj. 24 Sed ve al vi
riĉuloj! ĉar vi jam ricevis vian konsolon. 25 Ve al vi
satigitaj! ĉar vi malsatos. Ve al vi, kiuj nun ridas!
ĉar vi malĝojos kaj ploros. 26 Ve, kiam ĉiuj homoj
parolos bone pri vi! ĉar tiel same faris iliaj patroj al la
falsaj profetoj. 27 Sed mi diras al vi, kiuj aŭdas: Amu
viajn malamikojn, faru bonon al viaj malamantoj; 28
benu tiujn, kiuj vin malbenas; preĝu por tiuj, kiuj
kun insulto vin atakas. 29 Al tiu, kiu frapas vin sur la
vango, prezentu ankaŭ la alian; kaj de tiu, kiu prenas
vian mantelon, ne detenu vian tunikon. 30 Donu al
ĉiu, kiu petas de vi; kaj de tiu, kiu forprenas viajn
posedaĵojn, ne repostulu ilin. 31 Kaj kiel vi volas, ke la
homoj faru al vi, faru ankaŭ al ili tiel same. 32 Kaj se
vi amas tiujn, kiuj amas vin, kian dankon vi havas?
ĉar eĉ la pekuloj amas tiujn, kiuj ilin amas. 33 Kaj se vi
bonfaras al viaj bonfarantoj, kian dankon vi havas?
ĉar eĉ la pekuloj tiel same faras. 34 Kaj se vi pruntas al
tiuj, de kiuj vi esperas ricevi, kian dankon vi havas? eĉ
pekuloj pruntas al pekuloj, por egale rericevi. 35 Sed
amu viajn malamikojn, kaj bonfaru, kaj pruntedonu,
pri neniu perdante esperon; kaj via rekompenco estos
granda, kaj vi estos filoj de la Plejalta; ĉar Li estas
bona al la nedankemuloj kaj malbonuloj. 36 Estu
kompatemaj, kiel via Patro estas kompatema. 37 Kaj
ne juĝu, kaj vi ne estos juĝitaj; kaj ne kondamnu,
kaj vi ne estos kondamnitaj; liberigu, kaj vi estos
liberigitaj; 38 donu, kaj estos donite al vi; bonan
mezuron, premitan, kunskuitan, superfluantan, oni
donos en vian sinon. Ĉar per kia mezuro vi mezuras,

per tia oni remezuros al vi. 39 Kaj li parolis ankaŭ al ili
parabolon: Ĉu blindulo povas gvidi blindulon? ĉu ne
falos ambaŭ en fosaĵon? 40 Disĉiplo ne estas super sia
instruisto; sed perfektigite, ĉiu estos kiel lia instruisto.
41 Kaj kial vi rigardas la lignereton, kiu estas en la
okulo de via frato, kaj ne pripensas la trabon, kiu
estas en via propra okulo? 42 Kiel vi povas diri al via
frato: Frato, lasu min eltiri la lignereton, kiu estas en
via okulo; dum vi ne pripensas la trabon en via propra
okulo? Hipokritulo! eltiru unue la trabon el via okulo,
kaj tiam vi klare vidos, por eltiri la lignereton, kiu
estas en la okulo de via frato. 43 Ĉar ne ekzistas bona
arbo, kiu donas putran frukton; nek putra arbo, kiu
donas bonan frukton. 44 Ĉar ĉiu arbo estas konata per
sia propra frukto. Ĉar el dornarbetoj oni ne kolektas
figojn, nek el rubusujo oni rikoltas vinberojn. 45 Bona
homo el la bona trezorejo de sia koro liveras bonon,
kaj malbona homo el la malbona trezorejo liveras
malbonon; ĉar el la abundo de la koro parolas lia
buŝo. 46 Kaj kial vi min vokas: Sinjoro, Sinjoro; kaj
ne faras tion, kion mi diras? 47 Pri ĉiu, kiu venas al
mi, kaj aŭdas miajn parolojn, kaj plenumas ilin, mi
montros al vi, al kiu li similas: 48 li similas al viro,
kiu, konstruante domon, fosis kaj profunde kavigis,
kaj metis fundamenton sur la roko; kaj kiam okazis
inundo, la rivero sin ĵetis kontraŭ tiun domon, kaj ne
povis ĝin ŝanceli; ĉar ĝi estis bone konstruita. 49 Sed
tiu, kiu aŭdas kaj ne plenumas, similas al viro, kiu
konstruis sur la tero sen fundamento domon; kontraŭ
kiun la rivero sin ĵetis, kaj ĝi tuj enfalis, kaj la ruino
de tiu domo estis granda.

7 Fininte ĉiujn siajn dirojn en la oreloj de la popolo,
li eniris en Kapernaumon. 2 Kaj sklavo de unu
centestro, kiu estis kara por li, estis malsana kaj
preskaŭ mortanta. 3 Kaj aŭdinte pri Jesuo, tiu sendis
al li pliaĝulojn de la Judoj, por peti, ke li venu, por
savi lian sklavon. 4 Kaj veninte al Jesuo, ili insiste
petegis, dirante: Li estas inda, ke vi faru al li tiun
komplezon; 5 ĉar li amas nian nacion, kaj li mem
konstruigis por ni la sinagogon. 6 Kaj Jesuo ekiris kun
ili. Kaj kiam li estis ne malproksime de la domo, la
centestro sendis al li amikojn, por diri al li: Sinjoro,
ne ĝenu vin; ĉar mi ne estas inda, ke vi venu sub mian
tegmenton; 7 pro tio mi ne opiniis min inda veni al
vi. Sed vorton parolu, kaj mia knabo saniĝos. 8 Ĉar mi
ankaŭ estas homo metita sub aŭtoritato, havante sub
mi soldatojn; kaj mi diras al ĉi tiu: Iru; kaj li iras; kaj
al alia: Venu; kaj li venas; kaj al mia sklavo: Faru ĉi
tion; kaj li ĝin faras. 9 Kaj kiam Jesuo tion aŭdis, li
miris pri li, kaj sin turninte, diris al la homamaso,
lin sekvanta: Mi diras al vi: Eĉ en Izrael mi ne trovis
tiom da fido. 10 Kaj la senditoj, reveninte al la domo,
trovis la sklavon sana. 11 Kaj post nelonge li iris al
urbo nomata Nain, kaj akompanis lin liaj disĉiploj
kaj granda homamaso. 12 Kaj kiam li alproksimiĝis
al la pordego de la urbo, jen oni elportis mortinton,
la solan filon de lia patrino, kaj ŝi estis vidvino; kaj
granda homamaso el la urbo estis kun ŝi. 13 Kaj kiam
la Sinjoro ŝin vidis, li kortuŝiĝis pri ŝi, kaj diris al ŝi:
Ne ploru. 14 Kaj li alproksimiĝis, kaj tuŝis la portilon,
kaj la portantoj haltis. Kaj li diris: Junulo, mi diras al
vi: Leviĝu. 15 Kaj la mortinto side leviĝis kaj komencis
paroli. Kaj li donis lin al lia patrino. 16 Kaj timo
kaptis ĉiujn; kaj ili gloris Dio, dirante: Granda profeto
leviĝis inter ni; kaj: Dio vizitis Sian popolon. 17 Kaj
ĉi tiu famo pri li eliris tra la tuta Judujo, kaj tra la
tuta ĉirkaŭaĵo. 18 Kaj la disĉiploj de Johano sciigis
lin pri ĉio tio. 19 Kaj Johano, alvokinte al si du el
siaj disĉiploj, sendis ilin al la Sinjoro, por diri: Ĉu vi
estas la venonto, aŭ ĉu ni atendu alian? 20 Kaj kiam la
viroj alvenis al li, ili diris: Johano, la Baptisto, sendis
nin al vi, por diri: Ĉu vi estas la venonto, aŭ ĉu ni
atendu alian? 21 En tiu horo li sanigis multajn je
malsanoj kaj pestoj kaj malbonaj spiritoj; kaj al multaj
blinduloj li redonis vidpovon. 22 Kaj li respondis kaj
diris al ili: Iru kaj sciigu Johanon pri tio, kion vi vidis
kaj aŭdis: blinduloj vidas, lamuloj marŝas, lepruloj
estas purigitaj, kaj surduloj aŭdas, mortintoj leviĝas,
al malriĉuloj evangelio estas predikata. 23 Kaj feliĉa
estas ĉiu, kiu ne falpuŝiĝas pro mi. 24 Kaj kiam la
senditoj de Johano foriris, li komencis paroli al la
homamasoj pri Johano: Kion vi eliris en la dezerton,
por rigardi? ĉu junkon skuatan de la vento? 25 Sed
kion vi eliris, por vidi? ĉu homon per mola vestaro
vestitan? Jen tiuj, kiuj portas luksan vestaron kaj
delikate vivadas, troviĝas en domoj de reĝoj. 26 Sed
kion vi eliris, por vidi? ĉu profeton? Jes, mi diras al
vi, kaj multe pli ol profeton. 27 Ĉar li estas tiu, pri
kiu estas skribite: Jen Mi sendos Mian anĝelon antaŭ
via vizaĝo, Kaj li preparos antaŭ vi vian vojon. 28 Mi
diras al vi: Inter naskitoj de virinoj estas neniu pli
granda ol Johano; tamen tiu, kiu estas nur malgranda
en la regno de Dio, estas pli granda ol li. 29 Kaj la

tuta popolo kaj la impostistoj, aŭdinte, pravigis Dion,
ĉar ili ricevis la bapton de Johano. **30** Sed la Fariseoj
kaj la leĝistoj rifuzis por si la intencon de Dio, ĉar ili
ne estis baptitaj de li. **31** Al kio do mi komparos la
homojn de ĉi tiu generacio? kaj al kio ili similas? **32**
Ili similas al infanoj, kiuj sidas sur la placo kaj vokas
unu al alia, dirante: Ni flutis al vi, kaj vi ne dancis; ni
lamentis, kaj vi ne ploris. **33** Ĉar Johano, la Baptisto,
venis, nek manĝante panon nek trinkante vinon; kaj
vi diras: Li havas demonon. **34** La Filo de homo venis,
manĝante kaj trinkante; kaj vi diras: Jen manĝegulo
kaj vindrinkulo, amiko de impostistoj kaj pekuloj! **35**
Kaj la saĝeco estas pravigita de ĉiuj siaj infanoj. **36**
Kaj unu el la Fariseoj petis lin, ke li manĝu kun li.
Kaj li eniris en la domon de la Fariseo, kaj sidiĝis ĉe
manĝo. **37** Kaj jen estis en la urbo virino pekulino; kaj
kiam ŝi eksciis, ke Jesuo sidas ĉe manĝo en la domo de
la Fariseo, ŝi alportis alabastran vazon da ŝmiraĵo,
**38** kaj starante malantaŭe ĉe liaj piedoj, plorante, ŝi
komencis priverŝi liajn piedojn per ŝiaj larmoj, kaj
viŝis ilin per la haroj de sia kapo, kaj kisadis liajn
piedojn, kaj ŝmiris ilin per la ŝmiraĵo. **39** Kaj kiam
la Fariseo, kiu lin invitis, tion vidis, li parolis en si,
dirante: Ĉi tiu, se li estus profeto, ja scius, kiu kaj kia
virino lin tuŝas, ke ŝi estas pekulino. **40** Kaj responde
Jesuo diris al li: Simon, mi havas ion diri al vi. Kaj li
diris: Majstro, parolu. **41** Unu pruntedoninto havis
du ŝuldantojn; unu ŝuldis kvincent denarojn, kaj la
alia kvindek. **42** Kiam ili havis nenion, per kio pagi,
li pardonis al ambaŭ la ŝuldon. Kiu el ili do lin pli
amos? **43** Simon responde diris: Tiu, mi supozas, al
kiu li pardonis la pli grandan ŝuldon. Kaj li diris al li:
Vi prave juĝis. **44** Kaj sin turnante al la virino, li diris
al Simon: Ĉu vi vidas ĉi tiun virinon? Mi eniris en
vian domon, vi ne donis al mi akvon por la piedoj; sed
ŝi priverŝis miajn piedojn per siaj larmoj kaj viŝis ilin
per siaj haroj. **45** Vi ne donis al mi kison; sed ŝi, de la
tempo, kiam mi eniris, ne ĉesis kisadi miajn piedojn.
**46** Vi ne ŝmiris mian kapon per oleo; sed ŝi ŝmiris
miajn piedojn per ŝmiraĵo. **47** Pro tio mi diras al vi:
Ŝiaj pekoj, kiuj estas multaj, estas pardonitaj; ĉar ŝi
multe amis; sed al kiu malmulto estas pardonita, tiu
malmulte amas. **48** Kaj li diris al ŝi: Viaj pekoj estas
pardonitaj. **49** Kaj tiuj, kiuj sidis ĉe manĝo kun li,
komencis diri inter si: Kiu estas ĉi tiu, kiu eĉ pardonas
pekojn? **50** Kaj li diris al la virino: Via fido vin savis;
iru en pacon.

**8** Kaj post ne longe li vojiradis tra urboj kaj vilaĝoj,
predikante kaj alportante la evangelion de la regno
de Dio, kaj kun li la dek du, **2** kaj iuj virinoj, kiuj estis
resanigitaj je malbonaj spiritoj kaj malsanoj: Maria,
kiu estis nomata Magdalena, el kiu eliris sep demonoj,
**3** kaj Joana, edzino de Ĥuzas, la ĉambelano de Herodo,
kaj Susana, kaj multaj aliaj, kiuj faris al ili helpan
servadon per sia havo. **4** Kaj kiam granda homamaso
kolektiĝis, kaj homoj el ĉiu urbo venis al li, li diris per
parabolo: **5** La semisto eliris, por semi sian semon;
kaj dum li semis, iuj semoj falis apud la vojo kaj estis
piedpremitaj, kaj la birdoj de la ĉielo formanĝis ilin. **6**
Kaj aliaj falis sur ŝtonan lokon, kaj kreskinte, velkis,
ĉar ili ne havis malsekaĵon. **7** Kaj aliaj falis meze
inter dornojn; kaj la dornoj kunkreskis, kaj sufokis
ilin. **8** Kaj aliaj falis en la bonan teron, kaj kreskinte,
produktis frukton centoble. Dirinte tion, li kriis: Kiu
havas orelojn por aŭdi, tiu aŭdu. **9** Kaj liaj disĉiploj
demandis al li, kia estas ĉi tiu parabolo. **10** Kaj li diris:
Al vi estas donite scii la misterojn de la regno de Dio;
sed al la aliaj per paraboloj, por ke, vidante, ili ne
rimarku, kaj aŭdante, ili ne komprenu. **11** La parabolo
estas jena: La semo estas la vorto de Dio. **12** Kaj la
falintaj apud la vojo estas tiuj, kiuj aŭdis; tiam venas
la diablo, kaj forprenas la vorton el ilia koro, por
ke ili ne kredu kaj ne estu savitaj. **13** Kaj la falintaj
sur la ŝtonan lokon estas tiuj, kiuj, aŭdinte, kun ĝojo
akceptas la vorton; sed ili ne havas radikon, kaj kredas
nur portempe, kaj en tempo de tento ili defalas. **14** Kaj
tio, kio falis inter dornojn, estas tiuj, kiuj aŭdis, kaj
dum sia irado sufokiĝas per zorgoj kaj riĉo kaj plezuroj
de la vivo, kaj ne perfektigas frukton. **15** Kaj tio, kio
falis en la bonan teron, estas tiuj, kiuj en bela kaj
bona koro, aŭdinte la vorton, konservas ĝin, kaj kun
pacienco donas frukton. **16** Kaj ekbruliginte lampon,
oni ne kovras ĝin per vazo, aŭ forŝovas ĝin sub liton;
sed metas ĝin sur lampingon, por ke la enirantoj
povu vidi la lumon. **17** Ĉar estas kaŝita nenio, kio ne
malkaŝiĝos; kaj ne estas io sekreta, kio ne koniĝos
kaj klare elmontriĝos. **18** Atentu do, kiamaniere vi
aŭdas; ĉar kiu ajn havas, al tiu estos donite; kaj kiu ajn
ne havas, de tiu estos forprenita eĉ tio, kion li ŝajne
havas. **19** Kaj alvenis al li lia patrino kaj liaj fratoj, kaj
ili ne povis lin atingi pro la homamaso. **20** Kaj oni
sciigis lin: Via patrino kaj viaj fratoj staras ekstere, kaj
deziras vin vidi. **21** Sed respondante, li diris al ili: Mia
patrino kaj miaj fratoj estas tiuj, kiuj aŭdas la vorton

de Dio, kaj ĝin plenumas. **22** Kaj en unu el tiuj tagoj
eniris en ŝipeton li kaj liaj disĉiploj; kaj li diris al ili: Ni
transiru al la alia bordo de la lago; kaj ili surmariĝis.
**23** Sed dum ili veturis, li endormiĝis; kaj falis ventego
sur la lagon; kaj ili tute pleniĝis de akvo, kaj estis en
danĝero. **24** Kaj ili venis al li, kaj vekis lin, dirante:
Estro, estro, ni pereas. Kaj li leviĝis, kaj admonis la
venton kaj la furiozon de la akvo; kaj ili ĉesiĝis, kaj
fariĝis sereno. **25** Kaj li diris al ili: Kie estas via fido?
Kaj ili timis kaj miris, dirante unu al la alia: Kiu do
estas ĉi tiu? ĉar li ordonas eĉ al la ventoj kaj al la
akvo, kaj ili obeas al li. **26** Kaj ili ŝipveturis al la lando
de la Gerasenoj, kiu estas kontraŭ Galileo. **27** Kaj kiam
li surbordiĝis, renkontis lin el la urbo viro, havanta
demonojn; kaj jam de longe li ne portis vestojn, kaj
loĝis ne en domo, sed en la tomboj. **28** Kaj vidinte
Jesuon, li ekkriis kaj falis antaŭ li, kaj laŭtvoĉe diris:
Kio estas inter mi kaj vi, ho Jesuo, Filo de Dio Plejalta?
mi petas vin, ne turmento min. **29** Ĉar li ordonis al la
malpura spirito eliri el la homo. Ĉar ĝi ofte kaptis
lin, kaj li estis sub gardantaro, kaj ligita per ĉenoj kaj
katenoj; kaj disrompinte la ligilojn, li estis peladata
de la demono en la dezertojn. **30** Kaj Jesuo demandis
lin: Kia estas via nomo? Kaj li diris: Legio; ĉar multaj
demonoj eniris en lin. **31** Kaj ili petegis lin, ke li ne
ordonu al ili foriri en la abismon. **(Abyssos g12)** **32** Kaj
estis tie granda grego da porkoj, paŝtiĝantaj sur la
monto; kaj ili petegis lin, ke li permesu al ili eniri en
la porkojn. Kaj li tion permesis al ili. **33** Kaj elirinte el
la viro, la demonoj eniris en la porkojn; kaj la grego
kuris de la krutaĵo en la lagon, kaj sufokiĝis. **34** Kaj
kiam iliaj paŝtistoj vidis la okazintaĵon, ili forkuris,
kaj rakontis ĝin en la urbo kaj en la kamparo. **35** Kaj
oni eliris por vidi, kio okazis; kaj ili venis al Jesuo,
kaj trovis la viron, el kiu eliris la demonoj, sidanta,
vestita kaj en sana prudento, ĉe la piedoj de Jesuo, kaj
ili timis. **36** Kaj la vidintoj rakontis al ili, kiamaniere
la demonhavinto saniĝis. **37** Kaj la tuta homamaso,
el la ĉirkaŭaĵo de la Gerasenoj, petis lin foriri de ili;
ĉar ili estis tenataj de granda timo; kaj li eniris en
ŝipeton kaj returne veturis. **38** Sed la viro, el kiu
eliris la demonoj, petis lin, ke li povu esti kun li;
sed li forsendis lin, dirante: **39** Reiru al via domo,
kaj rakontu ĉion, kion Dio faris por vi. Kaj li foriris,
famigante tra la tuta urbo ĉion, kion Jesuo faris por li.
**40** Kaj kiam Jesuo revenis, la homamaso bonvenigis
lin, ĉar ĉiuj atendis lin. **41** Kaj jen venis viro, nomata
Jairos, kaj li estis sinagogestro; kaj li sin ĵetis antaŭ la
piedojn de Jesuo, kaj petegis lin, ke li venu en lian
domon; **42** ĉar li havis unu solan filinon, proksimume
dekdujaran, kaj ŝi estis mortanta. Kaj dum li iris, la
homamaso ĉirkaŭpremis lin. **43** Kaj virino, kiu jam
dek du jarojn havis sangofluon, kaj elspezis sian tutan
havon por kuracistoj, kaj ne povis esti resanigita de
iu, **44** venis malantaŭ lin, kaj tuŝis la randon de lia
vestaĵo; kaj tuj ŝia sangofluo ĉesiĝis. **45** Kaj Jesuo diris:
Kiu min tuŝis? Kaj kiam ĉiuj neis, Petro diris: Estro, la
homamaso ĉirkaŭas kaj premas vin. **46** Sed Jesuo diris:
Iu min tuŝis; ĉar mi sentis, ke de mi eliris potenco.
**47** Kaj kiam la virino ekvidis, ke ŝi ne estas kaŝita, ŝi
venis tremanta, kaj, sin ĵetante antaŭ lin, sciigis antaŭ
la tuta popolo, pro kia motivo ŝi tuŝis lin, kaj kiel ŝi
estas tuj sanigita. **48** Kaj li diris al ŝi: Filino, via fido
vin savis; iru en pacon. **49** Dum li ankoraŭ parolis, jen
iu venis de la domo de la sinagogestro, dirante: Via
filino jam mortis; ne ĝenu la instruiston. **50** Sed Jesuo,
aŭdinte tion, respondis al li: Ne timu; nur kredu, kaj
ŝi estos savita. **51** Kaj kiam li venis al la domo, li
permesis al neniu eniri kun li, krom Petro kaj Johano
kaj Jakobo kaj la patro kaj la patrino de la knabino. **52**
Kaj ĉiuj ploris kaj ĝemis pro ŝi; sed li diris: Ne ploru;
ĉar ŝi ne mortis, sed dormas. **53** Kaj ili mokridis lin,
sciante, ke ŝi mortis. **54** Sed li, preninte ŝian manon,
vokis ŝin, dirante: Knabino, leviĝu. **55** Kaj ŝia spirito
revenis, kaj ŝi tuj stariĝis; kaj li ordonis, ke oni donu
al ŝi manĝi. **56** Kaj ŝiaj gepatroj estis mirigitaj; sed li
ordonis, ke ili diru al neniu tion, kio estis farita.

**9** Kaj li kunvokis la dek du, kaj donis al ili potencon
kaj aŭtoritaton super ĉiuj demonoj, kaj por forigi
malsanojn. **2** Kaj li forsendis ilin, por prediki la regnon
de Dio, kaj por sanigi la malsanulojn. **3** Kaj li diris
al ili: Portu nenion por la vojo — nek bastonon, nek
saketon, nek panon, nek monon; kaj ne havu du
tunikojn. **4** Kaj en kiun ajn domon vi eniros, tie loĝu,
kaj el tie ekvojaĝu. **5** Kaj se ie oni vin ne akceptos,
tiam, forirante el tiu urbo, deskuu la polvon de viaj
piedoj, por atesto kontraŭ ili. **6** Kaj ili, foririnte, trairis
la vilaĝojn, ĉie predikante la evangelion kaj sanigante.
**7** Kaj la tetrarĥo Herodo aŭdis pri ĉio, kio fariĝis; kaj
li embarasiĝis, ĉar iuj diris, ke Johano leviĝis el la
mortintoj; **8** kaj aliaj, ke Elija aperis; kaj aliaj, ke unu
el la antikvaj profetoj releviĝis. **9** Kaj Herodo diris:
Johanon mi senkapigis, sed kiu estas ĉi tiu, pri kiu

mi aŭdas tiajn aferojn? Kaj li deziris vidi lin. 10 Kaj
la apostoloj, reveninte, rakontis al li ĉion, kion ili
faris. Kaj li kondukis ilin, kaj foriris aparte al urbo,
nomata Betsaida. 11 Sed la homamaso, eksciinte tion,
sekvis lin; kaj li akceptis ilin, kaj parolis al ili pri
la regno de Dio, kaj tiujn, kiuj bezonis kuracon, li
resanigis. 12 Kaj ekvesperiĝis; kaj la dek du, alveninte,
diris al li: Forsendu la homamason, por ke ili iru en la
ĉirkaŭajn vilaĝojn kaj kampojn, por trovi ripozejojn
kaj nutraĵon; ĉar ĉi tie ni estas en dezerta loko. 13 Sed li
diris al ili: Vi donu al ili manĝi. Kaj ili diris: Ni havas ne
pli ol kvin panojn kaj du fiŝojn, se ni ne irus kaj aĉetus
manĝaĵon por ĉi tiu tuta homomulto. 14 Ĉar ĉeestis
proksimume kvin mil viroj. Kaj li diris al siaj disĉiploj:
Sidigu ilin en aroj, po proksimume kvindek. 15 Kaj
tion ili faris, kaj sidigis ĉiujn. 16 Kaj li prenis la kvin
panojn kaj la du fiŝojn, kaj suprenrigardinte al la ĉielo,
li ilin benis kaj dispecigis, kaj donis al la disĉiploj, por
meti antaŭ la homamason. 17 Kaj ili manĝis, kaj ĉiuj
satiĝis; kaj oni kolektis da postrestintaj fragmentoj
dek du korbojn. 18 Kaj dum li preĝis en soleco, la
disĉiploj estis kun li; kaj li demandis ilin, dirante: Kiu,
diras la popolo, ke mi estas? 19 Kaj ili responde diris:
Laŭ iuj Johano, la Baptisto; sed laŭ aliaj: Elija; kaj laŭ
aliaj, ke unu el la antikvaj profetoj releviĝis. 20 Sed
li diris al ili: Sed vi — kiu vi diras, ke mi estas? Kaj
Petro responde diris: La Kristo de Dio. 21 Sed li per
severa ordono admonis, ke ili diru ĉi tion al neniu; 22
dirante: La Filo de homo devas multe suferi, kaj esti
rifuzita de la pliaĝuloj kaj ĉefpastroj kaj skribistoj,
kaj esti mortigita, kaj la trian tagon releviĝi. 23 Kaj
li diris al ĉiuj: Se iu volas veni post mi, li abnegaciu
sin, kaj levu sian krucon ĉiutage, kaj sekvu min. 24
Ĉar kiu volos savi sian animon, tiu ĝin perdos; sed
kiu perdos sian animon pro mi, tiu ĝin savos. 25 Ĉar
kiel profitus homo, se li gajnus la tutan mondon kaj
sin perdus aŭ pereigus? 26 Ĉar kiu hontos pri mi
kaj pri miaj paroloj, pri tiu hontos la Filo de homo,
kiam li venos en sia gloro, kaj la gloro de la Patro
kaj de la sanktaj anĝeloj. 27 Sed mi diras al vi certe:
Inter la ĉi tie starantaj estas iuj, kiuj neniel gustumos
morton, antaŭ ol ili vidos la regnon de Dio. 28 Kaj
pasis post tiuj diroj ĉirkaŭ ok tagoj, kaj li prenis kun
si Petron kaj Johanon kaj Jakobon, kaj supreniris sur
la monton, por preĝi. 29 Kaj dum li preĝis, la aspekto
de lia vizaĝo aliiĝis, kaj lia vestaro fariĝis blanka kaj
fulme brilanta. 30 Kaj jen interparolis kun li du viroj,
kiuj estis Moseo kaj Elija, 31 kiuj montriĝis en gloro,
kaj parolis pri lia foriro, kiun li estis plenumonta en
Jerusalem. 32 Sed Petro, kaj tiuj, kiuj estis kun li,
estis subpremataj de dormo; sed vekiĝinte, ili vidis
lian gloron, kaj la du virojn, kiuj staris kun li. 33 Kaj
dum ili foriris de li, Petro diris al Jesuo: Estro, estas
bone por ni esti ĉi tie; kaj ni faru tri laŭbojn: unu por
vi, kaj unu por Moseo, kaj unu por Elija; li ne sciis,
kion li diras. 34 Kaj dum li tion diris, nubo venis kaj
superombris ilin; kaj ili timis, kiam ili eniris en la
nubon. 35 Kaj el la nubo venis voĉo, diranta: Ĉi tiu
estas Mia Filo, Mia elektito; lin aŭskultu. 36 Kaj dum la
voĉo ankoraŭ sonis, Jesuo troviĝis sola. Kaj ili silentis,
kaj al neniu en tiuj tagoj rakontis ion, kion ili vidis. 37
Kaj la sekvantan tagon, post kiam ili malsupreniris
de la monto, granda homamaso renkontis lin. 38
Kaj jen unu viro el la homamaso ekkriis, dirante:
Majstro, mi petegas vin rigardi mian filon, ĉar li
estas mia sola infano; 39 kaj jen spirito kaptas lin,
kaj subite li ekkrias, kaj ĝi konvulsiigas lin kun buŝa
ŝaŭmo, kaj malfacile lasas lin, kontuzinte lin. 40 Kaj
mi petis viajn disĉiplojn, ke ili elpelu ĝin; sed ili ne
povis. 41 Kaj Jesuo respondis kaj diris: Ho senfida kaj
perversa generacio, ĝis kiam mi estos kun vi kaj vin
toleros? venigu ĉi tien vian filon. 42 Kaj dum li venis,
la demono lin ĵetis sur la teron kaj lin konvulsiigis.
Sed Jesuo severe admonis la malpuran spiriton, kaj
sanigis la knabon kaj redonis lin al la patro. 43 Kaj ĉiuj
miregis pro la majesto de Dio. Sed dum ĉiuj miris pri
ĉio, kion li faris, li diris al siaj disĉiploj: 44 Penetrigu
ĉi tiujn vortojn en viajn orelojn: ĉar la Filo de homo
estos transdonita en la manojn de homoj. 45 Sed ili ne
komprenis tiun diron, kaj ĝi estis kaŝita for de ili, por
ke ili ne sciu ĝian signifon; kaj ili timis demandi al
li pri tiu diro. 46 Kaj komenciĝis diskutado inter ili
pri tio, kiu el ili estos la plej granda. 47 Sed Jesuo,
vidinte la diskutadon de iliaj koroj, prenis infanon,
kaj starigis lin apud si, 48 kaj diris al ili: Kiu akceptos
ĉi tiun infanon en mia nomo, tiu min akceptas; kaj
kiu min akceptos, tiu akceptas Tiun, kiu min sendis;
ĉar kiu estas plej malgranda inter vi ĉiuj, tiu estas
granda. 49 Kaj Johano respondis kaj diris: Estro, ni
vidis iun elpelantan demonojn en via nomo; kaj ni
malpermesis lin, ĉar li ne sekvas kun ni. 50 Sed Jesuo
diris al li: Ne malpermesu; ĉar tiu, kiu ne estas kontraŭ
vi, estas por vi. 51 Kaj kiam la tagoj maturiĝis por
lia suprenakcepto, li firmigis sian vizaĝon, por iri al

Jerusalem, 52 kaj sendis senditojn antaŭ sia vizaĝo;
kaj ili iris, kaj eniris en vilaĝon de la Samarianoj,
por pretigi por li. 53 Kaj tiuj lin ne akceptis, ĉar lia
vizaĝo estis direktata al Jerusalem. 54 Kaj liaj disĉiploj
Jakobo kaj Johano, tion vidinte, diris: Sinjoro, ĉu vi
volas, ke ni ordonu fajron malsuprenveni el la ĉielo
kaj ekstermi ilin? 55 Sed li sin turnis kaj admonis ilin;
kaj li diris: Vi mem ne scias, laŭ kia spirito vi estas. 56
Ĉar la Filo de homo venis, ne por pereigi animojn de
homoj, sed por savi. Kaj ili iris en alian vilaĝon. 57 Kaj
dum ili vojaĝis, sur la vojo iu diris al li: Mi vin sekvos,
kien ajn vi iros. 58 Kaj Jesuo diris al li: La vulpoj havas
kavojn, kaj la birdoj de la ĉielo havas ripozejojn; sed la
Filo de homo ne havas, kie kuŝigi sian kapon. 59 Kaj li
diris al alia: Sekvu min. Sed li diris: Sinjoro, permesu
al mi unue iri kaj enterigi mian patron. 60 Sed li diris
al li: Lasu la mortintojn enterigi siajn mortintojn; sed
vi iru kaj proklamu la regnon de Dio. 61 Kaj ankoraŭ
alia diris: Mi vin sekvos, Sinjoro; sed unue permesu al
mi adiaŭi tiujn, kiuj estas en mia domo. 62 Sed Jesuo
diris al li: Neniu, metinte sian manon al la plugilo kaj
rigardante malantaŭen, taŭgas por la regno de Dio.

**10** Kaj post tio la Sinjoro elektis sepdek aliajn, kaj
ilin forsendis duope antaŭ sia vizaĝo en ĉiun
urbon kaj ĉiun lokon, kien li mem estis venonta. 2 Kaj
li diris al ili: La rikolto estas granda, sed la laborantoj
estas malmultaj; petu do la Estron de la rikolto, ke
Li sendu laborantojn en Sian rikolton. 3 Iru; jen mi
sendas vin kiel ŝafidojn meze de lupoj. 4 Ne portu
monujon, nek saketon, nek ŝuojn; kaj salutu neniun
sur la vojo. 5 Kaj en kiun ajn domon vi eniros, unue
diru: Paco al ĉi tiu domo. 6 Kaj se tie estos filo de
paco, via paco restos sur li; sed se ne, ĝi revenos
al vi. 7 Kaj en tiu sama domo restu, manĝante kaj
trinkante tion, kion ili havas; ĉar la laboranto meritas
sian salajron. Ne transiru de domo en domon. 8 Kaj
en kiun ajn urbon vi eniros, kaj oni vin akceptos,
manĝu tion, kion oni metos antaŭ vin; 9 kaj sanigu
la tieajn malsanulojn, kaj diru al ili: La regno de Dio
alproksimiĝis al vi. 10 Sed en kiun ajn urbon vi eniros,
kaj oni ne akceptos vin, eliru sur ĝiajn stratojn, kaj
diru: 11 Eĉ la polvon de via urbo, kiu sin tenas al niaj
piedoj, ni deviŝas kontraŭ vin; tamen sciu, ke la regno
de Dio alproksimiĝis al vi. 12 Mi diras al vi: Estos pli
elporteble en tiu tago por Sodom, ol por tiu urbo. 13
Ve al vi, Ĥorazin! ve al vi, Betsaida! ĉar se en Tiro
kaj Cidon estus faritaj tiuj potencaj faroj, kiuj fariĝis
en vi, ili jam antaŭ longe pentus, sidante en sakaĵo
kaj cindro. 14 Tamen estos pli elporteble por Tiro kaj
Cidon en la juĝado, ol por vi. 15 Kaj vi, Kapernaum,
ĉu vi estos altigita ĝis la ĉielo? vi ja malsupreniros
ĝis Hades. (Hadēs g86) 16 Kiu vin aŭskultas, tiu min
aŭskultas; kiu vin malŝatas, tiu min malŝatas; kaj kiu
min malŝatas, tiu malŝatas Tiun, kiu min sendis. 17
Kaj la sepdek revenis kun ĝojo, dirante: Sinjoro, eĉ la
demonoj submetiĝas al ni per via nomo. 18 Kaj li diris
al ili: Mi vidis Satanon falanta de la ĉielo, kiel fulmo.
19 Jen mi donis al vi aŭtoritaton piedpaŝi sur serpentoj
kaj skorpioj, kaj sur la tuta potenco de la malamiko;
kaj nenio iel vin difektos. 20 Tamen ne ĝoju pri tio, ke
la spiritoj submetiĝis al vi; sed ĝoju, ke viaj nomoj
estas skribitaj en la ĉielo. 21 En tiu sama horo li ĝojis
en la Sankta Spirito, kaj diris: Mi Vin gloras, ho Patro,
Estro de la ĉielo kaj la tero, ke Vi kaŝis ĉi tion for de
saĝuloj kaj prudentuloj, kaj malkaŝis al infanetoj; jes,
Patro, ĉar al Vi tio bone plaĉis. 22 Ĉio estas transdonita
al mi de mia Patro; kaj neniu scias, kiu estas la Filo,
krom la Patro; nek kiu estas la Patro, krom la Filo, kaj
tiu, al kiu la Filo volas malkaŝi Lin. 23 Kaj sin turninte
al la disĉiploj, li flanke diris: Feliĉaj estas la okuloj,
kiuj vidas tion, kion vi vidas; 24 ĉar mi diras al vi,
ke multaj profetoj kaj reĝoj deziris vidi tion, kion vi
vidas, kaj ili ne vidis; kaj aŭdi tion, kion vi aŭdas,
kaj ili ne aŭdis. 25 Kaj jen unu leĝisto stariĝis, kaj
tentis lin, dirante: Majstro, kion mi faru, por heredi
eternan vivon? (aiōnios g166) 26 Kaj li diris al li: Kio estas
skribita en la leĝo? kiel vi legas? 27 Kaj li responde
diris: Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro
kaj per via tuta animo kaj per via tuta forto kaj per
via tuta menso, kaj vian proksimulon kiel vin mem.
28 Kaj li diris al li: Vi prave respondis; tion faru, kaj vi
vivos. 29 Sed li, dezirante pravigi sin, diris al Jesuo:
Kaj kiu estas mia proksimulo? 30 Jesuo respondis
kaj diris: Unu homo malsupreniris de Jerusalem al
Jeriĥo; kaj li falis en la manojn de rabistoj, kiuj lin
senvestigis kaj batis, kaj foriris, lasante lin duone
senviva. 31 Kaj laŭ okazo unu pastro malsupreniris la
saman vojon; kaj lin vidinte, li preterpasis aliflanke.
32 Kaj tiel same unu Levido, veninte al la loko kaj lin
vidinte, preterpasis aliflanke. 33 Sed unu Samariano,
vojaĝante, alvenis tien, kie li estis, kaj lin ekvidinte,
li kortuŝiĝis, 34 kaj alproksimiĝis, kaj bandaĝis liajn
vundojn, kaj surverŝis oleon kaj vinon; kaj li metis lin

sur sian beston, kaj kondukis lin al gastejo, kaj zorgis
pri li. 35 Kaj la morgaŭan tagon li elprenis du denarojn
kaj donis ilin al la gastejestro, kaj diris: Zorgu pri
li, kaj kion pli vi elspezos, mi tion repagos al vi,
kiam mi revenos. 36 Kiu el tiuj tri, laŭ via opinio, sin
montris proksimulo de tiu, kiu falis en la manojn de
la rabistoj? 37 Kaj li diris: Tiu, kiu faris al li kompaton.
Kaj Jesuo diris al li: Iru vi, kaj faru tion saman. 38 Kaj
dum ili vojaĝis, li eniris en unu vilaĝon; kaj virino,
nomata Marta, akceptis lin en sian domon. 39 Kaj ŝi
havis fratinon, nomatan Maria, kaj ĉi tiu sidis apud
la piedoj de la Sinjoro, kaj aŭskultis lian parolon. 40
Sed Marta estis distrata pro multo da servado; kaj ŝi
alproksimiĝis, kaj diris: Sinjoro, ĉu vi ne zorgas pri
tio, ke mia fratino lasis al mi servi sola? diru do al
ŝi, ke ŝi min helpu. 41 Sed la Sinjoro respondis kaj
diris al ŝi: Marta, Marta, vi zorgas kaj klopodadas pri
multaj aferoj; 42 sed unu afero estas necesa; kaj Maria
elektis la bonan parton, kiu ne estos prenita for de ŝi.

**11** Kaj li preĝis en iu loko; kaj kiam li ĉesis preĝi,
unu el liaj disĉiploj diris al li: Sinjoro, instruu
nin preĝi, kiel ankaŭ Johano instruis siajn disĉiplojn.
2 Kaj li diris al ili: Kiam vi preĝas, diru: Patro, Estu
sanktigita Via nomo. Venu Via regno. 3 Donu al ni
tagon post tago nian ĉiutagan panon. 4 Kaj pardonu
al ni niajn pekojn, ĉar ni ankaŭ pardonas al ĉiu, kiu
ŝuldas al ni. Kaj ne konduku nin en tenton. 5 Kaj
li diris al ili: Kiu el vi havos amikon, kaj iros al li
noktomeze, kaj diros al li: Amiko, pruntu al mi tri
panojn; 6 ĉar amiko mia venis al mi post vojaĝo, kaj
mi ne havas, kion meti antaŭ lin; 7 kaj tiu de interne
respondos kaj diros: Ne ĝenu min; la pordo estas jam
fermita, kaj miaj infanoj kun mi estas en lito; mi ne
povas min levi kaj doni al vi? 8 Mi diras al vi: Kvankam
li ne volos pro sia amikeco al li leviĝi kaj doni al li,
tamen, pro ĉi ties persisteco li leviĝos kaj donos al li
tiom, kiom li bezonas. 9 Kaj mi diras al vi: Petu, kaj al
vi estos donite; serĉu, kaj vi trovos; frapu, kaj al vi
estos malfermite. 10 Ĉar ĉiu petanto ricevas; kaj la
serĉanto trovas; kaj al la frapanto estos malfermite.
11 Kaj de kiu el vi, kiu estas patro, filo petos panon,
kaj li donos al li ŝtonon? aŭ se li petas fiŝon, ĉu li
anstataŭ fiŝo donos al li serpenton? 12 Aŭ se li petos
ovon, ĉu li donos al li skorpion? 13 Se vi do, estante
malbonaj, scias doni bonajn donacojn al viaj infanoj,
des pli via Patro ĉiela donos la Sanktan Spiriton al
tiuj, kiuj petos al Li. 14 Kaj li estis elpelanta demonon,
kiu estis muta. Kaj kiam la demono eliris, la mutulo
parolis; kaj la homamaso miregis. 15 Sed iuj el ili
diris: Per Baal-Zebub, la estro de la demonoj, li elpelas
demonojn. 16 Kaj aliaj, tentante lin, postulis de li
signon el la ĉielo. 17 Sed li, sciante iliajn pensojn, diris
al ili: Ĉiu regno, dividita kontraŭ si, dezertiĝas; kaj
domo, dividita kontraŭ domo, falas. 18 Kaj se ankaŭ
Satano dividiĝas kontraŭ si, kiel staros lia regno? ĉar
vi diras, ke per Baal-Zebub mi elpelas demonojn. 19
Kaj se per Baal-Zebub mi elpelas demonojn, per kiu
viaj filoj ilin elpelas? tial ili estos viaj juĝantoj. 20 Sed
se per la fingro de Dio mi elpelas demonojn, tiam
la regno de Dio jam venis sur vin. 21 Kiam fortulo
plene armita gardas sian palacon, en paco estas liaj
posedaĵoj; 22 sed kiam venas iu pli forta ol li kaj
venkos lin, li forprenas lian plenarmilaron, al kiu li
fidis, kaj disdonas lian havon. 23 Kiu ne estas kun mi,
tiu estas kontraŭ mi; kaj kiu ne kolektas kun mi, tiu
disĵetas. 24 Kiam la malpura spirito eliris el homo,
ĝi trairas tra senakvaj lokoj, serĉante ripozon; kaj
ne trovante ĝin, diras: Mi reiros al mia domo, el kie
mi eliris. 25 Kaj alveninte, ĝi trovas ĝin balaita kaj
ornamita. 26 Tiam ĝi iras kaj alprenas al si sep aliajn
spiritojn pli malbonajn ol ĝi mem, kaj ili, enirinte,
loĝas tie; kaj la fina stato de tiu homo fariĝas pli
malbona, ol la unua. 27 Kaj dum li ĉi tion parolis, unu
virino el la homamaso levis sian voĉon, kaj diris al li:
Feliĉaj estas la ventro, kiu naskis vin, kaj la mamoj,
kiujn vi suĉis. 28 Sed li diris: Sed pli ĝuste, feliĉaj estas
tiuj, kiuj aŭdas la vorton de Dio kaj observas ĝin. 29
Kaj kiam la homamaso kolektiĝis al li, li ekparolis,
dirante: Ĉi tiu generacio estas malbona generacio; ĝi
serĉas signon, kaj signo ne estos donita al ĝi, krom
la signo de Jona. 30 Ĉar kiel Jona estis signo por la
Nineveanoj, tiel ankaŭ estos la Filo de homo por ĉi tiu
generacio. 31 La reĝino de la sudo leviĝos en la juĝado
kun la viroj de ĉi tiu generacio, kaj ilin kondamnos;
ĉar ŝi venis el la finoj de la tero, por aŭskulti la saĝon
de Salomono; kaj jen iu pli granda ol Salomono estas
ĉi tie. 32 Viroj Nineveanoj staros en la juĝado kun ĉi
tiu generacio, kaj ĝin kondamnos; ĉar ili pentis pro
la predikado de Jona; kaj jen iu pli granda ol Jona
estas ĉi tie. 33 Kiam oni ekbruligis lampon, oni metas
ĝin ne en kaŝejon, nek sub grenmezurilon, sed sur la
lampingon, por ke la enirantoj povu vidi la lumon. 34
La lampo de via korpo estas via okulo; kiam via okulo

estas sendifekta, via tuta korpo estas luma; sed kiam
ĝi estas malbona, via korpo ankaŭ estas malluma. 35
Tial viglu, ke la lumo, kiu estas en vi, ne estu mallumo.
36 Tial, se via tuta korpo estas luma, havante nenian
malluman parton, ĝi estos tute lumplena, kiel kiam la
lampo lumas al vi per sia brilo. 37 Kaj dum li parolis,
unu Fariseo invitis lin matenmanĝi kun li; kaj li eniris
kaj sidiĝis. 38 Kaj la Fariseo, ekvidinte, miris, ke li
ne lavis sin antaŭ la matenmanĝo. 39 Kaj la Sinjoro
diris al li: Vi Fariseoj purigas la eksteron de kaliko
kaj plado, sed via interno estas plena de rabado kaj
malvirto. 40 Malsaĝuloj! ĉu Tiu, kiu faris la eksteron,
ne faris ankaŭ la internon? 41 Tamen, uzu por almozo
la internaĵojn, kaj jen ĉio estas al vi pura. 42 Sed ve al
vi, Fariseoj! ĉar vi pagas dekonaĵojn de mento kaj ruto
kaj ĉiu vegetaĵo, kaj preterlasas juĝon kaj amon al Dio;
ĉi tion vi devus fari, kaj tion ne preterlasi. 43 Ve al
vi, Fariseoj! ĉar vi amas la ĉefseĝojn en la sinagogoj,
kaj la salutojn sur la placoj. 44 Ve al vi! ĉar vi similas
tombojn ne vidatajn; kaj la homoj, kiuj iras super ili,
ne scias. 45 Kaj unu el la leĝistoj responde diris al li:
Majstro, dirante ĉi tion, vi ankaŭ nin riproĉas. 46 Kaj
li diris: Ve ankaŭ al vi, leĝistoj! ĉar vi ŝarĝas homojn
per ŝarĝoj malfacile porteblaj, kaj vi mem ne tuŝas eĉ
per unu el viaj fingroj la ŝarĝojn. 47 Ve al vi! ĉar vi
konstruas la tombojn de la profetoj, kiujn viaj patroj
mortigis. 48 Tial vi estas atestantoj, kaj konsentas
al la faroj de viaj patroj; ĉar ili mortigis ilin, kaj vi
konstruas la tombojn. 49 Tial ankaŭ diris la saĝo de
Dio: Mi sendos al ili profetojn kaj apostolojn, kaj iujn
el tiuj ili mortigos kaj persekutos; 50 por ke la sango
de ĉiuj profetoj, kiu estis elverŝita de post la komenco
de la mondo, estu postulita el ĉi tiu generacio, 51 de
la sango de Habel ĝis la sango de Zeĥarja, kiu pereis
inter la altaro kaj la sankta domo; jes, mi diras al vi: Ĝi
estos postulita el ĉi tiu generacio. 52 Ve al vi, leĝistoj!
ĉar vi forprenis la ŝlosilon de la scio; vi mem ne eniris,
kaj vi malhelpis la enirantajn. 53 Kaj kiam li eliris
el tie, la skribistoj kaj la Fariseoj atakis lin insiste,
kaj instigis lin paroli pri multaj aferoj; 54 insidante
kontraŭ li, por kapti ion el lia buŝo.

**12** Dume, kiam la miriadoj de la homamaso
kunkolektiĝis tiel, ke ili piedpremis unu la alian,
li ekparolis al siaj disĉiploj, dirante unue: Gardu
vin kontraŭ la fermentaĵo de la Fariseoj, kiu estas
hipokriteco. 2 Sed estas nenio kovrita, kio ne estos
elmontrita; kaj nenio kaŝita, kio ne estos sciata. 3 Tial,
kion vi diris en la mallumo, tio estos aŭdita en la lumo;
kaj kion vi parolis en orelon en internaj ĉambroj, tio
estos proklamita sur la tegmentoj. 4 Kaj mi diras al vi,
miaj amikoj: Ne timu tiujn, kiuj mortigas la korpon,
kaj poste ne povas fari ion plu. 5 Sed mi montros al
vi, kiun vi devas timi: Timu Tiun, kiu, mortiginte,
plue havas aŭtoritaton enĵeti en Gehenan; jes, mi
diras al vi: Tiun timu. (Geenna g1067) 6 Ĉu oni ne vendas
kvin paserojn por du asaroj? kaj eĉ unu el ili ne estas
forgesita antaŭ Dio. 7 Sed eĉ la haroj de via kapo
estas ĉiuj kalkulitaj. Ne timu; vi pli valoras ol multaj
paseroj. 8 Kaj mi diras al vi: Ĉiun, kiu konfesos min
antaŭ la homoj, la Filo de homo ankaŭ konfesos antaŭ
la anĝeloj de Dio; 9 sed kiu malkonfesos min antaŭ
la homoj, tiu estos malkonfesita antaŭ la anĝeloj
de Dio. 10 Kaj por ĉiu, kiu parolos vorton kontraŭ
la Filo de homo, estos pardono; sed por tiu, kiu
blasfemas kontraŭ la Sankta Spirito, ne estos pardono.
11 Kaj kiam oni kondukos vin antaŭ la sinagogojn
kaj regantojn kaj aŭtoritatulojn, ne zorgu, kiel aŭ
kion respondi, aŭ kion diri; 12 ĉar la Sankta Spirito
instruos al vi en tiu horo mem tion, kion vi devas
diri. 13 Kaj unu el la homamaso diris al li: Majstro,
diru al mia frato, ke li dividu kun mi la heredaĵon.
14 Sed li diris al li: Ho viro, kiu starigis min super
vi kiel juĝanton aŭ dividanton? 15 Kaj li diris al ili:
Zorgu, kaj gardu vin kontraŭ ĉia avideco, ĉar la vivo
de homo ne konsistas en la abundeco de liaj posedaĵoj.
16 Kaj li parolis al ili parabolon, dirante: La bieno de
unu riĉulo donis abunde; 17 kaj li konsideris, dirante:
Kion mi faru, ĉar mi ne havas lokon, kie mi povas
amasigi miajn fruktojn? 18 Kaj li diris: Jen kion mi
faros: mi disbatos miajn grenejojn kaj konstruos pli
grandajn, kaj tie mi amasigos mian grenon kaj miajn
posedaĵojn. 19 Kaj mi diros al mia animo: Animo,
vi havas multajn posedaĵojn, provizitajn por multaj
jaroj; ripozu, manĝu, trinku, estu gaja. 20 Sed Dio diris
al li: Ho senprudentulo! ĉi tiun nokton oni postulas
de vi vian animon; kies estos tio, kion vi preparis? 21
Tia estas tiu, kiu kolektas por si trezoron, kaj ne estas
riĉa rilate Dion. 22 Kaj li diris al siaj disĉiploj: Tial mi
diras al vi: Ne zorgu pri via vivo, kion vi manĝu; nek
pri via korpo, kion vi surmetu. 23 Ĉar la vivo estas pli
ol nutraĵo, kaj la korpo pli ol vestaĵo. 24 Pripensu la
korvojn, ke ili ne semas, nek rikoltas, kaj ne havas
provizejon nek grenejon; kaj Dio nutras ilin; kiom pli

vi valoras, ol la birdoj! 25 Kaj kiu el vi per zorgado
povas aldoni unu ulnon al sia staturo? 26 Se do vi
ne povas fari eĉ la plej malgrandan aferon, kial vi
zorgas pri la ceteraj? 27 Pripensu la liliojn, kiel ili
kreskas; ili ne laboras, nek ŝpinas; tamen mi diras al
vi: Eĉ Salomono en sia tuta gloro ne estis ornamita
tiel, kiel unu el ĉi tiuj. 28 Sed se Dio tiel vestas la
kampan herbaĵon, kiu hodiaŭ ekzistas, kaj morgaŭ
estos ĵetata en fornon, kiom pli certe Li vestos vin, ho
malgrandfiduloj! 29 Kaj ne serĉu, kion vi manĝos, kaj
kion vi trinkos, kaj ne estu dubemaj. 30 Ĉar pri ĉio
tio serĉas la nacioj de la mondo; sed via Patro scias,
ke vi tion bezonas. 31 Sed celu Lian regnon, kaj ĉio
tio estos aldonita al vi. 32 Ne timu, malgranda grego;
ĉar bone plaĉis al la Patro doni al vi la regnon. 33
Vendu viajn posedaĵojn, kaj donu almozon; faru por
vi monujojn, kiuj ne fariĝos malnovaj, trezoron ne
mankontan en la ĉielo, kie ŝtelisto ne alproksimiĝas
kaj tineo ne detruas. 34 Ĉar kie estas via trezoro, tie
estos ankaŭ via koro. 35 Viaj lumboj estu zonitaj, kaj
viaj lampoj estu brulantaj; 36 kaj vi mem estu similaj
al viroj, kiuj atendas sian sinjoron, kiam li revenos de
la edziĝa festo; por ke ili tuj malfermu al li, kiam li
venos kaj frapos. 37 Feliĉaj estas tiuj servistoj, kiujn
la sinjoro, kiam li venos, trovos viglaj; vere mi diras
al vi, ke li sin zonos, kaj sidigos ilin por manĝi, kaj
mem venos kaj servos al ili. 38 Kaj se li alvenos nokte
dum la dua gardoparto, aŭ dum la tria gardoparto,
kaj tiel ilin trovos, feliĉaj estas tiuj servistoj. 39 Sed
sciu, ke se la domomastro scius, je kioma horo la
ŝtelisto venos, li maldormus kaj ne lasus sian domon
trafosiĝi. 40 Vi ankaŭ estu pretaj, ĉar en tiu horo,
kiun vi ne pripensas, la Filo de homo venos. 41 Kaj
Petro diris: Sinjoro, ĉu vi parolas ĉi tiun parabolon
por ni, aŭ ankaŭ por ĉiuj? 42 Kaj la Sinjoro diris:
Kiu do estas la fidela kaj saĝa administranto, kiun
lia sinjoro starigos super sia servantaro, por doni
al ili ĝustatempe ilian porcion da nutraĵo? 43 Feliĉa
estas tiu servisto, kiun lia sinjoro, veninte, trovos
aganta tiel. 44 Vere mi diras al vi, ke li starigos lin
super ĉio, kion li havas. 45 Sed se tiu servisto diros
en sia koro: Mia sinjoro prokrastas sian alvenon; kaj
komencos bati la knabojn kaj la knabinojn, kaj manĝos
kaj trinkos kaj ebriiĝos, 46 la sinjoro de tiu servisto
alvenos en tago, kiam li ne atendas, kaj en horo, pri
kiu li ne scias; kaj tranĉe skurĝos lin, kaj difinos por
li parton kun la senfiduloj. 47 Kaj tiu servisto, kiu
sciis la volon de sia sinjoro, kaj nenion pretigis, nek
faris laŭ lia volo, suferos multajn batojn; 48 sed tiu,
kiu ne sciis, kaj laŭ siaj agoj meritis batojn, suferos
malmultajn batojn. Kaj al kiu multo estas donita,
el tiu estos multo postulata; kaj al kiu oni multon
komisiis, el tiu oni des pli multon postulos. 49 Mi
alvenis, por ĵeti fajron sur la teron; kaj kion mi volas,
se jam ĝi ekbrulis? 50 Sed mi havas bapton, per kiu esti
baptita; kaj kiel mi premiĝas, ĝis ĝi estos plenumita!
51 Ĉu vi supozas, ke mi alvenis, por doni pacon sur
la tero? Mi diras al vi: Ne; sed pli vere disigon; 52
ĉar de nun estos kvin el unu domo disigitaj, tri
kontraŭ du, kaj du kontraŭ tri. 53 Estos disigitaj patro
kontraŭ filo, kaj filo kontraŭ patro; patrino kontraŭ
filino, kaj filino kontraŭ patrino; bopatrino kontraŭ
bofilino, kaj bofilino kontraŭ bopatrino. 54 Kaj li diris
al la homamasoj: Kiam vi vidas nubon leviĝantan
en la okcidento, vi tuj diras: Venos pluveto; kaj tiel
fariĝas. 55 Kaj kiam blovas la suda vento, vi diras:
Estos varmego; kaj tiel fariĝas. 56 Ho hipokrituloj! vi
scias esplori la aspekton de la tero kaj de la ĉielo; sed
kial vi ne scias esplori ĉi tiun tempon? 57 Kaj kial eĉ
per vi mem vi ne juĝas, kio estas justa? 58 Ĉar dum
vi iradas kun via kontraŭulo al la reganto, survoje
klopodu liberiĝi de li; por ne lasi, ke li trenu vin al la
juĝisto, kaj la juĝisto vin transdonu al la oficisto de la
tribunalo, kaj la oficisto vin ĵetu en malliberejon. 59
Mi diras al vi: Vi neniel el tie eliros, ĝis vi pagos la
lastan lepton.

**13** Kaj ĉeestis en tiu sama tempo iuj, kiuj rakontis
al li pri tiuj Galileanoj, kies sangon Pilato miksis
kun iliaj oferaĵoj. 2 Kaj responde li diris al ili: Ĉu
vi pensas, ke tiuj Galileanoj estis pekuloj pli ol ĉiuj
Galileanoj, pro tio, ke ili tion suferis? 3 Mi diras
al vi: Neniel; sed se vi ne pentos, vi ĉiuj tiel same
pereos. 4 Aŭ pri tiuj dek ok, sur kiujn falis la turo
en Ŝiloaĥ kaj ilin mortigis, ĉu vi pensas, ke ili estis
pekuloj pli ol ĉiuj homoj, kiuj loĝis en Jerusalem?
5 Neniel, mi diras al vi; sed se vi ne pentos, vi ĉiuj
ankaŭ pereos. 6 Kaj li parolis la jenan parabolon: Unu
viro havis figarbon, plantitan en lia vinberĝardeno,
kaj li venis, serĉante frukton sur ĝi, kaj ne trovis. 7
Kaj li diris al la vinberisto: Jen tri jarojn mi venas,
serĉante frukton sur ĉi tiu figarbo, kaj mi ne trovas;
elhaku ĝin; kial ĝi senutiligas ankaŭ la teron? 8 Sed li
responde diris: Sinjoro, lasu ĝin resti ankaŭ ĉi tiun

jaron, ĝis mi fosos ĉirkaŭ ĝi kaj metos sterkon; 9 kaj
se ĝi poste donos frukton, bone; sed se ne, vi elhakos
ĝin. 10 Kaj li instruadis en unu el la sinagogoj en la
sabato. 11 Kaj jen virino, kiu dum dek ok jaroj havis
spiriton de malforteco; kaj ŝi estis kunkurbita kaj
neniel povis leviĝi. 12 Kaj vidinte ŝin, Jesuo vokis ŝin,
kaj diris: Virino, vi estas liberigita el via malforteco.
13 Kaj li metis sur ŝin la manojn, kaj ŝi tuj rektiĝis
kaj gloris Dion. 14 Kaj la sinagogestro, indignante, ke
Jesuo resanigis en la sabato, respondis kaj diris al la
homamaso: Ekzistas ses tagoj, en kiuj oni devas labori;
en ili do venu, por esti resanigitaj, kaj ne en la sabata
tago. 15 Sed la Sinjoro respondis al li kaj diris: Ho
hipokrituloj! ĉu ne ĉiu el vi en la sabato malligas sian
bovon aŭ sian azenon el la stalo, kaj forkondukas ĝin,
por trinkigi? 16 Kaj ĉu ne devis ĉi tiu virino, estante
filino de Abraham, ligite de Satano jen dek ok jarojn,
esti malligita el ĉi tiu kateno en la sabata tago? 17 Kaj
kiam li tion diris, ĉiuj liaj kontraŭuloj hontiĝis; kaj la
tuta homamaso ĝojis pro ĉiuj gloraj agoj, faritaj de li.
18 Kaj li diris: Al kio similas la regno de Dio? kaj al kio
mi ĝin komparu? 19 Ĝi estas simila al sinapa semeto,
kiun viro prenis kaj ĵetis en sian ĝardenon; kaj ĝi
kreskis kaj fariĝis arbo; kaj la birdoj de la ĉielo loĝis
en ĝiaj branĉoj. 20 Poste li diris: Al kio mi komparu la
regnon de Dio? 21 Ĝi estas simila al fermentaĵo, kiun
virino prenis kaj kaŝis en tri mezuroj da faruno, ĝis
la tuto fermentis. 22 Kaj li iris tra urboj kaj vilaĝoj,
instruante kaj irante ĉiam pluen al Jerusalem. 23 Kaj
iu diris al li: Sinjoro, ĉu malmultaj estas la savataj?
Kaj li diris al ili: 24 Strebu eniri tra la mallarĝa pordo;
ĉar multaj, mi diras al vi, deziros eniri kaj ne povos.
25 Kiam la domomastro leviĝos kaj ŝlosos la pordon,
kaj vi komencos stari ekstere kaj frapi sur la pordon,
dirante: Sinjoro, malfermu al ni; kaj li respondos kaj
diros al vi: Mi ne scias, de kie vi estas; 26 tiam vi
ekparolos: Ni manĝis kaj trinkis antaŭ vi, kaj sur niaj
stratoj vi instruadis; 27 kaj li parolos, kaj diros al vi:
Mi ne scias, de kie vi estas; foriru de mi, ĉiuj farantoj
de maljusteco. 28 Tie estos la plorado kaj la grincado
de dentoj, kiam vi vidos Abrahamon kaj Isaakon kaj
Jakobon kaj ĉiujn profetojn en la regno de Dio, kaj vin
mem forpelitaj eksteren. 29 Kaj oni venos el oriento
kaj el okcidento, kaj el nordo kaj el sudo, kaj sidiĝos
en la regno de Dio. 30 Kaj jen estas lastaj, kiuj estos
unuaj; kaj estas unuaj, kiuj estos lastaj. 31 En tiu sama
horo alvenis iuj Fariseoj, kaj diris al li: Eliru kaj foriru
de ĉi tie, ĉar Herodo volas mortigi vin. 32 Kaj li diris al
ili: Iru, kaj diru al tiu vulpo: Jen mi elpelas demonojn
kaj faras sanigojn hodiaŭ kaj morgaŭ, kaj la trian
tagon mi estos perfektigita. 33 Sed mi devas iradi
hodiaŭ kaj morgaŭ kaj postmorgaŭ, ĉar ne povas esti,
ke profeto pereos ekster Jerusalem. 34 Ho Jerusalem,
Jerusalem, kiu pereigas la profetojn kaj ŝtonmortigas
tiujn, kiuj estas senditaj al ĝi! kiom ofte mi deziris
kolekti viajn infanojn, kiel kokino kolektas sian idaron
sub la flugilojn, kaj vi ne volis! 35 Jen via domo estas
lasita al vi dezerta; kaj mi diras al vi: Vi min ne vidos,
ĝis vi diros: Estu benata tiu, kiu venas en la nomo de
la Eternulo.

**14** Kaj kiam li eniris en sabato en la domon de unu
reganto de la Fariseoj, por manĝi panon, ili lin
observis. 2 Kaj jen antaŭ li estis unu hidropsulo. 3 Kaj
respondante, Jesuo parolis al la leĝistoj kaj la Fariseoj,
kaj diris: Ĉu estas permesate sanigi en sabato, aŭ ne?
4 Sed ili silentis. Kaj li prenis lin kaj sanigis lin, kaj
forliberigis lin. 5 Kaj li diris al ili: Kiu el vi havos
azenon aŭ bovon, falintan en puton, kaj ne tuj eltiros
ĝin en sabata tago? 6 Kaj ili ne povis respondi al tio. 7
Kaj li parolis parabolon al la invititoj, vidinte, kiel
ili elektas la ĉefajn sidlokojn; li diris al ili: 8 Kiam vi
estas invitita de iu al edziĝa festo, ne sidiĝu en la
ĉefa loko, por ke ne okazu, ke iu, pli honorinda ol vi,
estas de li invitita; 9 kaj tiu, kiu invitis vin kaj lin,
venos, kaj diros al vi: Cedu lokon al ĉi tiu; kaj tiam vi
komencos kun honto preni la lastan lokon. 10 Sed
kiam vi estas invitita, iru kaj sidiĝu en la lasta loko;
kaj tiel, kiam venos tiu, kiu vin invitis, li diros al vi:
Amiko, iru pli alten; tiam vi havos honoron antaŭ
ĉiuj, kiuj sidas kun vi. 11 Ĉar ĉiu, kiu sin altigas, estos
humiligita, kaj kiu sin humiligas, tiu estos altigita.
12 Kaj li diris al tiu, kiu lin invitis: Kiam vi faras
tagmanĝon aŭ vespermanĝon, ne voku viajn amikojn,
nek viajn fratojn, nek viajn parencojn, nek viajn riĉajn
najbarojn, por ke ne okazu, ke ili ankaŭ invitos vin, kaj
vi ricevos rekompencon. 13 Sed kiam vi faras festenon,
invitu malriĉulojn, kriplulojn, lamulojn, blindulojn; 14
kaj vi estos feliĉa, ĉar ili ne povas rekompenci vin, sed
vi rekompenciĝos en la releviĝo de la justuloj. 15 Kaj
aŭdinte tion, unu el la kunsidantoj diris al li: Feliĉa
estas tiu, kiu manĝos panon en la regno de Dio. 16 Sed
li diris al li: Unu viro faris grandan vespermanĝon,
kaj invitis multajn; 17 kaj en la horo de la festeno li

elsendis sian serviston, por diri al la invititoj: Venu,
ĉar ĉio estas jam preta. 18 Kaj ĉiuj tiel same komencis
peti pri indulgo. La unua diris al li: Mi aĉetis kampon,
kaj mi nepre devas eliri, por ĝin vidi; mi petas, kalkulu
al mi indulgon. 19 Alia diris: Mi aĉetis kvin jugojn da
bovoj, kaj mi iras, por ilin provi; mi petas, kalkulu al
mi indulgon. 20 Kaj alia diris: Mi edziĝis kun edzino,
kaj tial mi ne povas veni. 21 Kaj la servisto revenis, kaj
rakontis tion al sia mastro. Tiam ekkoleris la mastro,
kaj diris al sia servisto: Eliru rapide sur la stratojn kaj
irejojn de la urbo, kaj alkonduku ĉi tien la malriĉulojn
kaj kriplulojn kaj blindulojn kaj lamulojn. 22 Kaj la
servisto diris: Sinjoro, estas farita tio, kion vi ordonis,
kaj ankoraŭ estas loko. 23 Kaj la sinjoro diris al la
servisto: Eliru sur la vojojn kaj kamplimojn, kaj devigu
ilin enveni, por ke mia domo pleniĝu. 24 Ĉar mi diras
al vi, ke neniu el tiuj viroj invititaj gustumos mian
vespermanĝon. 25 Kaj grandaj homamasoj iris kun li,
kaj li sin turnis, kaj diris al ili: 26 Se iu venas al mi, kaj
ne malamas sian patron kaj sian patrinon kaj sian
edzinon kaj siajn infanojn kaj fratojn kaj fratinojn,
kaj eĉ ankaŭ sian vivon, li ne povas esti mia disĉiplo.
27 Kiu ne portas sian krucon kaj ne sekvas min, tiu
ne povas esti mia disĉiplo. 28 Ĉar kiu el vi, dezirante
konstrui turon, unue ne sidiĝas, por kalkuli la koston,
ĉu li havas sufiĉe, por fini ĝin? 29 Por ke, kiam li metis
la fundamenton kaj ne povas ĝin fini, ĉiuj vidantoj ne
komencu moki lin, 30 dirante: Ĉi tiu homo komencis
konstrui, sed ne povis fini. 31 Kaj kiu reĝo, ekirante,
por renkonti en batalo alian reĝon, unue ne sidiĝos,
por konsiliĝi, ĉu li povas kun dek mil renkonti tiun,
kiu venas kontraŭ li kun dudek mil? 32 Aŭ alie, dum la
alia estas tre malproksime, li alsendas ambasadorojn
kaj demandas pri paco. 33 Kiu do el vi ne forlasas
ĉiujn siajn posedaĵojn, tiu ne povas esti mia disĉiplo.
34 Salo do estas bona, sed se eĉ la salo sengustiĝis, per
kio ĝi estos spicata? 35 Ĝi taŭgas nek por la tero nek
por sterkejo; oni ĝin forĵetas. Kiu havas orelojn por
aŭdi, tiu aŭdu.

**15** Kaj ĉiuj impostistoj kaj pekuloj alproksimiĝis al
li, por aŭskulti lin. 2 Kaj murmuris la Fariseoj
kaj la skribistoj, dirante: Ĉi tiu akceptas pekulojn
kaj manĝas kun ili. 3 Kaj li parolis al ili la jenan
parabolon, dirante: 4 Kiu el vi, havante cent ŝafojn
kaj perdinte unu el ili, ne forlasas la naŭdek naŭ sur
la stepo, kaj iras, por serĉi tiun, kiun li perdis, ĝis
li ĝin trovos? 5 Kaj trovinte, li ĝin metas sur siajn
ŝultrojn, ĝojante. 6 Kaj reveninte domen, li kunvokas
siajn amikojn kaj siajn najbarojn, dirante al ili: Ĝoju
kun mi, ĉar mi trovis mian ŝafon, la perditan. 7 Mi
diras al vi, ke tiel same estos ĝojo en la ĉielo pro unu
pekulo, kiu pentas, pli ol pro naŭdek naŭ justuloj,
kiuj ne bezonas penton. 8 Kiu virino, havante dek
draĥmojn, se ŝi perdis unu draĥmon, ne ekbruligas
lampon kaj balaas la domon kaj serĉas diligente,
ĝis ŝi ĝin trovos? 9 Kaj trovinte, ŝi kunvokas siajn
amikinojn kaj siajn najbarinojn, dirante: Ĝoju kun
mi, ĉar mi trovis la draĥmon, kiun mi perdis. 10 Tiel
same, mi diras al vi, estas ĝojo antaŭ la anĝeloj de
Dio pro unu pekulo, kiu pentas. 11 Kaj li diris: Unu
viro havis du filojn; 12 kaj la pli juna diris al sia patro:
Patro, donu al mi la heredotan parton de la havo. Kaj
li dividis inter ili siajn vivrimedojn. 13 Kaj post ne
multaj tagoj la pli juna, kolektinte ĉion, forvojaĝis
al malproksima lando; kaj tie li disperdis sian havon
per diboĉa vivado. 14 Kaj kiam li jam elspezis ĉion,
forta malsato okazis en tiu lando, kaj li komencis havi
mankon. 15 Kaj li iris, kaj aliĝis al unu el la loĝantoj de
tiu lando; kaj ĉi tiu lin sendis sur siajn kampojn, por
paŝti porkojn. 16 Kaj li deziris plenigi sian ventron per
la karoboj, kiujn la porkoj manĝis; kaj neniu donis al
li. 17 Sed reveninte al si, li diris: Kiom da dungitoj de
mia patro havas panon abunde, sed mi ĉi tie pereas
de malsato! 18 Mi leviĝos, kaj iros al mia patro, kaj mi
diros al li: Patro, mi pekis kontraŭ la ĉielo kaj antaŭ
vi; 19 mi jam ne meritas esti nomata via filo; faru min
kiel unu el viaj dungitoj. 20 Kaj li leviĝis, kaj iris al
sia patro. Sed kiam li estis ankoraŭ malproksime, lia
patro lin vidis kaj kortuŝiĝis, kaj kurinte, falis sur lian
kolon kaj lin kisadis. 21 Kaj la filo diris al li: Patro,
mi pekis kontraŭ la ĉielo kaj antaŭ vi, kaj mi jam ne
meritas esti nomata via filo. 22 Kaj diris la patro al
siaj servistoj: Alportu rapide la ĉefan robon, kaj lin
vestu, kaj metu ringon sur lian manon kaj ŝuojn sur
liajn piedojn; 23 kaj alportu la grasigitan bovidon
kaj buĉu ĝin, kaj ni manĝu kaj estu gajaj; 24 ĉar ĉi
tiu mia filo estis mortinta, kaj denove vivas; li estis
perdita, kaj estas trovita. Kaj ili komencis esti gajaj. 25
Sed la pli maljuna filo estis sur la kampo; kaj kiam li
venis kaj alproksimiĝis al la domo, li aŭdis muzikon
kaj dancadon. 26 Kaj li alvokis unu el la knaboj, kaj
demandis lin, kio estas tio. 27 Kaj li diris al li: Via
frato venis, kaj via patro buĉis la grasigitan bovidon,

ĉar li ricevis lin sana. 28 Sed li koleris, kaj ne volis
eniri; kaj lia patro elvenis, kaj lin petegis. 29 Sed li
responde diris al sia patro: Jen tiom da jaroj mi servas
al vi, kaj neniam mi malobeis vian ordonon, tamen
vi neniam donis al mi kapridon, por ke mi estu gaja
kun miaj amikoj; 30 sed kiam venis ĉi tiu via filo, kiu
formanĝis vian havon kun malĉastistinoj, vi buĉis por
li la grasigitan bovidon. 31 Kaj li diris al li: Filo, vi estas
ĉiam kun mi, kaj ĉio mia estas via. 32 Sed konvenis
esti gajaj kaj ĝoji; ĉar ĉi tiu via frato estis mortinta,
kaj denove vivas; li estis perdita, kaj estas trovita.

16 Kaj li diris ankaŭ al siaj disĉiploj: Estis unu riĉa
homo, kiu havis administranton; kaj ĉi tiu estis
denuncita al li, ke li disperdas lian havon. 2 Kaj li
alvokis lin, kaj diris al li: Kio estas tio, kion mi aŭdas
pri vi? donu al mi konton de via administrado, ĉar vi
ne plu povas administradi. 3 Tiam la administranto
diris en si: Kion mi faru? ĉar mia sinjoro deprenas de
mi la administradon; fosi mi ne povas, kaj mi hontas
peti almozon. 4 Mi decidis, kion mi faros, por ke oni
akceptu min en siajn domojn, kiam mi estos eksigita
el la administra ofico. 5 Kaj alvokinte al si ĉiun el
la ŝuldantoj de sia sinjoro, li diris al la unua: Kiom
vi ŝuldas al mia sinjoro? 6 Kaj li diris: Cent bat'ojn
da oleo. Kaj li diris al li: Prenu vian kalkulon, kaj tuj
sidiĝu kaj skribu kvindek. 7 Tiam li diris al alia: Kaj
kiom vi ŝuldas? Kaj li diris: Cent kor'ojn da tritiko. Li
diris al li: Prenu vian kalkulon, kaj skribu okdek. 8 Kaj
tiu sinjoro laŭdis la maljustan administranton, ĉar li
prudente agis; ĉar la filoj de ĉi tiu mondo estas en sia
generacio pli prudentaj, ol la filoj de la lumo. (aiōn g165)
9 Kaj mi diras al vi: Faru al vi amikojn per la mamono
de maljusteco, por ke, kiam ĝi mankos, oni akceptu
vin en eternajn loĝejojn. (aiōnios g166) 10 Kiu estas fidela
en la plej malgranda afero, tiu estas fidela ankaŭ en
multo; kaj kiu estas maljusta en la plej malgranda,
tiu estas ankaŭ maljusta en multo. 11 Se do vi ne
estis fidelaj en la maljusta mamono, kiu konfidos al
vi la veran riĉon? 12 Kaj se vi ne estis fidelaj en tio,
kio apartenas al alia homo, kiu donos al vi tion, kio
estas via propra? 13 Nenia servanto povas servi al du
sinjoroj; ĉar aŭ li malamos unu kaj amos la alian, aŭ li
aliĝos al unu kaj malestimos la alian. Vi ne povas servi
al Dio kaj al Mamono! 14 Kaj la Fariseoj ankaŭ, kiuj
estis monavidaj, aŭdis ĉion tion, kaj ili lin mokis. 15 Kaj
li diris al ili: Vi estas tiuj, kiuj ŝajnigas sin justaj antaŭ
homoj, sed Dio scias viajn korojn; ĉar kio estas altigita
inter homoj, tio estas abomenaĵo antaŭ Dio. 16 La leĝo
kaj la profetoj estis ĝis Johano; de post tiu tempo la
evangelio de la regno de Dio estas predikata, kaj ĉiu
al ĝi sin perforte aligas. 17 Sed estas pli facile por la
ĉielo kaj la tero forpasi, ol por unu punkteto de la leĝo
fali. 18 Ĉiu, kiu forsendas sian edzinon kaj edziĝas kun
alia, adultas; kaj kiu edziĝas kun tiu, forsendita de sia
edzo, tiu adultas. 19 Estis unu riĉulo, kiu estis vestita
per purpuro kaj bisino, kaj festis lukse ĉiutage; 20
kaj apud lia pordego estis kuŝigita almozulo, nomata
Lazaro, kiu havis ulcerojn, 21 kaj deziris esti nutrata
per la panpecetoj, kiuj falis de la tablo de la riĉulo; kaj
eĉ venis la hundoj kaj lekis liajn ulcerojn. 22 Kaj la
almozulo mortis, kaj li estis forportita de la anĝeloj
sur la sinon de Abraham; la riĉulo ankaŭ mortis,
kaj estis enterigita. 23 Kaj en Hades li levis siajn
okulojn, estante en turmentoj, kaj vidis Abrahamon
malproksime kaj Lazaron sur lia sino. (Hadēs g86) 24 Kaj
li ekkriis, kaj diris: Patro Abraham, kompatu min, kaj
sendu Lazaron, por ke li trempu en akvon la pinton
de sia fingro, por malvarmigi mian langon; ĉar mi tre
suferas en ĉi tiu flamo. 25 Sed Abraham diris: Filo,
memoru, ke dum via vivo vi ricevis viajn bonaĵojn,
kaj Lazaro tiel same malbonaĵojn; sed nun li ricevas
konsolon, kaj vi suferas. 26 Kaj krom ĉio tio staras
granda abismo inter ni kaj vi, tiel ke tiuj, kiuj volus
iri de ĉi tie al vi, ne povas, kaj oni ne povas transiri
de tie al ni. 27 Kaj li diris: Tial mi petas, patro, ke vi
sendu lin al la domo de mia patro, 28 ĉar mi havas
kvin fratojn, por ke li atestu al ili, por ke ili ne venu
ankaŭ en ĉi tiun lokon de turmento. 29 Sed Abraham
diris: Ili havas Moseon kaj la profetojn; ili aŭskultu
ilin. 30 Sed li diris: Ne, patro Abraham; sed se unu
venos al ili el la mortintoj, ili pentos. 31 Kaj li diris al
li: Se ili ne aŭskultas Moseon kaj la profetojn, ili ne
kredos, eĉ se iu leviĝus el la mortintoj.

17 Kaj li diris al siaj disĉiploj: Ne povas esti, ke
faliloj ne venos, sed ve al tiu, per kiu ili venos! 2
Pli bone estus por tiu, se muelŝtono estus pendigita
ĉirkaŭ lia kolo, kaj se li estus ĵetita en la maron, ol
se li metus falilon por unu el ĉi tiuj malgranduloj. 3
Gardu vin; se via frato pekos, admonu lin; kaj se li
pentos, pardonu lin. 4 Kaj se li pekos kontraŭ vi sep
fojojn en la tago, kaj sep fojojn turniĝos al vi, dirante:
Mi pentas; vi lin pardonu. 5 Kaj la apostoloj diris al la

Sinjoro: Aldonu al ni fidon. 6 Kaj la Sinjoro diris: Se
vi havus fidon kiel semeron de sinapo, vi dirus al ĉi
tiu morusarbo: Estu elradikigita, kaj estu plantita en
la maron; kaj ĝi obeus al vi. 7 Sed kiu el vi, havante
serviston plugantan aŭ paŝtantan, diros al li, kiam li
envenis de la kampo: Tuj venu, kaj sidiĝu, por manĝi?
8 Ĉu li ne diros al li prefere: Preparu ion, por ke mi
verspermanĝu, kaj zonu vin, kaj servu al mi, dum mi
manĝos kaj trinkos; kaj poste vi manĝos kaj trinkos?
9 Ĉu li dankas la serviston, ĉar li faris tion, kio estis
ordonita? 10 Tiel ankaŭ vi, kiam vi faris ĉion, kio
estas ordonita al vi, diru: Ni estas senutilaj servistoj;
ni faris tion, kion fari estis nia devo. 11 Kaj dum ili
vojiris al Jerusalem, li trapasis tra la mezo de Samario
kaj de Galileo. 12 Kaj kiam ili eniris en unu vilaĝon,
renkontis lin dek lepruloj, kiuj staris malproksime; 13
kaj ili levis sian voĉon, dirante: Jesuo, estro, kompatu
nin. 14 Kaj vidinte ilin, li diris al ili: Iru, kaj montru
vin al la pastroj. Kaj dum ili iris, ili fariĝis puraj. 15
Kaj unu el ili, vidinte, ke li resaniĝis, revenis, glorante
Dion per laŭta voĉo, 16 kaj falis sur sian vizaĝon ĉe
liaj piedoj kaj dankis lin; kaj li estis Samariano. 17 Kaj
Jesuo responde diris: Ĉu ne la dek estis purigitaj? sed
kie estas la naŭ? 18 Ĉu ne troviĝis revenantoj, por
doni gloron al Dio, krom ĉi tiu fremdulo? 19 Kaj li
diris al li: Leviĝu kaj iru; via fido vin savis. 20 Kaj kiam
la Fariseoj demandis al li, kiam venos la regno de Dio,
li respondis al ili, dirante: La regno de Dio ne venas
kun observado; 21 kaj oni ne diros: Jen ĉi tie, aŭ: Jen
tie! ĉar jen la regno de Dio estas inter vi. 22 Kaj li diris
al la disĉiploj: Venos tagoj, kiam vi deziros vidi unu el
la tagoj de la Filo de homo, kaj vi ne vidos. 23 Kaj ili
diros al vi: Jen tie! Jen ĉi tie! Ne foriru, nek sekvu;
24 ĉar kiel la fulmo, kiam ĝi fulmas el unu subĉiela
flanko, lumas ĝis alia subĉiela flanko, tiel estos la Filo
de homo en sia tago. 25 Sed unue li devas multon
suferi, kaj esti malŝatata de ĉi tiu generacio. 26 Kaj
kiel estis en la tagoj de Noa, tiel estos en la tagoj
de la Filo de homo. 27 Oni manĝis, trinkis, edziĝis,
edziniĝis, ĝis la tago, kiam Noa eniris en la arkeon,
kaj venis la diluvo kaj pereigis ĉiujn. 28 Ankaŭ tiel
same, kiel estis en la tagoj de Lot; oni manĝis, trinkis,
aĉetis, vendis, plantis, konstruis; 29 sed en la tago,
kiam Lot eliris el Sodom, fajro kaj sulfuro falis el la
ĉielo kaj pereigis ĉiujn; 30 tiel same estos en tiu tago,
kiam la Filo de homo malkaŝiĝos. 31 Kiu estos sur la
tegmento en tiu tago, kun liaj havaĵoj en la domo, tiu
ne malsupreniru, por ilin forporti; kaj kiu estas sur la
kampo, tiu ankaŭ ne revenu. 32 Memoru la edzinon
de Lot. 33 Kiu penos gajni sian animon, tiu ĝin perdos;
sed kiu ĝin perdos, tiu savos ĝin viva. 34 Mi diras al vi:
En tiu nokto estos du viroj sur unu lito; unu estos
prenita, kaj la alia lasita. 35 Du virinoj estos muelantaj
kune; unu estos prenita, kaj la alia lasita. 36 Du viroj
estos sur kampo; unu estos prenita, kaj la alia lasita.
37 Kaj ili responde diris al li: Kie, Sinjoro? Kaj li diris al
ili: Kie estas la kadavro, tien ankaŭ kolektiĝos la agloj.

18 Kaj li parolis al ili parabolon pri tio, ke oni devas
ĉiam preĝi kaj ne laciĝi, 2 dirante: En unu urbo
estis juĝisto, kiu ne timis Dion, nek respektis homon;
3 kaj estis vidvino en tiu urbo, kaj ŝi venadis al li,
dirante: Faru por mi justecon kontraŭ mia kontraŭulo.
4 Kaj li ne volis dum kelka tempo, sed poste li diris
en si: Kvankam mi ne timas Dion, nek respektas
homon, 5 tamen, ĉar ĉi tiu vidvino min ĝenas, mi
faros por ŝi justecon, por ke ŝi ne malfortigu min per
sia ĉiama venado. 6 Kaj la Sinjoro diris: Aŭskultu,
kion diras la maljusta juĝisto. 7 Kaj ĉu Dio ne faros
justecon por Siaj elektitoj, kiuj tage kaj nokte krias
al Li, kvankam Li longe pri ili paciencas? 8 Mi diras
al vi: Rapide Li faros por ili justecon. Tamen kiam
venos la Filo de homo, ĉu li trovos fidon sur la tero?
9 Kaj li parolis la jenan parabolon, ankaŭ por iuj,
kiuj fidis al si, ke ili estas justuloj, kaj malestimis la
ceterajn: 10 Du homoj supreniris en la templon, por
preĝi; unu estis Fariseo, kaj la alia estis impostisto. 11
La Fariseo, starante, preĝis kun si jene: Ho Dio, mi Vin
dankas, ke mi ne estas kiel la ceteraj homoj, rabemaj,
maljustaj, adultemaj, nek eĉ kiel ĉi tiu impostisto. 12
Mi fastas dufoje en semajno; mi donas dekonaĵojn
el ĉio, kion mi akiras. 13 Sed la impostisto, starante
malproksime, ne volis eĉ levi la okulojn al la ĉielo, sed
batadis sian bruston, dirante: Ho Dio, estu favora al
mi pekulo. 14 Mi diras al vi: Ĉi tiu malsupreniris al sia
domo, pravigita pli ol tiu; ĉar ĉiu, kiu sin altigas, estos
humiligita; sed kiu sin humiligas, tiu estos altigita. 15
Kaj oni venigis al li ankaŭ siajn infanetojn, por ke li
tuŝu ilin; kaj la disĉiploj, vidinte, admonis ilin. 16 Sed
Jesuo alvokis ilin al si, dirante: Lasu la infanojn veni al
mi, kaj ne malhelpu ilin; ĉar el tiaj estas la regno de
Dio. 17 Vere mi diras al vi: Kiu ne akceptos la regnon
de Dio kiel infano, tiu neniel eniros en ĝin. 18 Kaj unu
reganto demandis al li, dirante: Bona Majstro, kion

mi faru, por heredi eternan vivon? (aiōnios g166) 19 Kaj
Jesuo diris al li: Kial vi nomas min bona? neniu estas
bona krom Unu, nome Dio. 20 Vi scias la ordonojn:
Ne adultu; Ne mortigu; Ne ŝtelu; Ne parolu malveran
ateston; Respektu vian patron kaj vian patrinon. 21
Kaj li diris: Ĉion tion mi observis detempe de mia
juneco. 22 Kaj Jesuo, aŭdinte, diris al li: Ankoraŭ unu
mankon vi havas: vendu ĉion, kion vi posedas, kaj
disdonu al malriĉuloj, kaj vi havos trezoron en la
ĉielo; kaj venu, sekvu min. 23 Sed aŭdinte tion, li
fariĝis tre malĝoja; ĉar li estis tre riĉa. 24 Kaj Jesuo, lin
rigardante, diris: Kiel malfacile tiuj, kiuj havas riĉon,
eniros en la regnon de Dio! 25 Ĉar estas pli facile por
kamelo iri tra trueton de kudrilo, ol por riĉulo eniri en
la regnon de Dio. 26 Kaj tiuj, kiuj tion aŭdis, diris: Kiu
do povos esti savita? 27 Sed li diris: Kio estas neebla
ĉe homoj, tio estas ebla ĉe Dio. 28 Kaj Petro diris: Jen
ni forlasis niajn propraĵojn, kaj sekvis vin. 29 Kaj li
diris al ili: Vere mi diras al vi: Estas neniu, kiu forlasis
domon aŭ edzinon aŭ fratojn aŭ gepatrojn aŭ infanojn
pro la regno de Dio, 30 kaj kiu ne ricevos multoble en
ĉi tiu tempo, kaj en la venonta mondo vivon eternan.
(aiōn g165, aiōnios g166) 31 Kaj preninte al si la dek du,
li diris al ili: Jen ni supreniras al Jerusalem; kaj ĉio
skribita per la profetoj estos plenumita al la Filo de
homo. 32 Ĉar li estos transdonita al la nacianoj, kaj
mokita kaj perfortita kaj surkraĉita; 33 kaj ili skurĝos
kaj mortigos lin; kaj la trian tagon li releviĝos. 34
Kaj ili komprenis nenion el tio, kaj ĉi tiu parolo estis
kaŝita for de ili, kaj ili ne sciis la dirojn. 35 Kaj kiam
li alproksimiĝis al Jeriĥo, unu blindulo sidis apud la
vojo, petante almozojn; 36 kaj aŭdinte homamason
preterirantan, li demandis, kio estas tio. 37 Kaj oni
diris al li, ke Jesuo, la Nazaretano, preteriras. 38 Kaj li
kriis, dirante: Jesuo, filo de David, kompatu min. 39
Kaj la antaŭirantoj admonis lin, ke li silentu; sed li
des pli forte kriis: Ho filo de David, kompatu min! 40
Kaj Jesuo haltis, kaj ordonis alkonduki lin; kaj kiam li
alproksimiĝis, li lin demandis: 41 Kion vi volas, ke mi
faru al vi? Kaj li diris: Sinjoro, ke mi ricevu vidpovon.
42 Kaj Jesuo diris al li: Ricevu vidpovon; via fido vin
savis. 43 Kaj li tuj ricevis vidpovon, kaj sekvis lin,
glorante Dion; kaj la tuta popolo, vidinte tion, donis
laŭdon al Dio.

19 Kaj li eniris en Jeriĥon kaj ĝin trapasis. 2 Kaj jen
viro, nomata Zakĥeo; kaj li estis ĉefimpostisto,
kaj li estis riĉa. 3 Kaj li penis vidi Jesuon, kia homo
li estas; kaj li ne povis pro la homamaso, ĉar li estis
malgranda je staturo. 4 Kaj antaŭkurinte antaŭen,
li supreniris sur sikomorarbon, por lin vidi; ĉar li
estis preterpasonta tie. 5 Kaj kiam Jesuo venis al la
loko, li suprenrigardis, kaj diris al li: Zakĥeo, rapide
malsupreniru, ĉar hodiaŭ mi devas loĝi en via domo. 6
Kaj li rapide malsupreniris, kaj akceptis lin ĝoje. 7 Kaj
vidinte, ĉiuj murmuris, dirante: Ĉe pekulo li eniris,
por gasti. 8 Kaj Zakĥeo, starante, diris al la Sinjoro:
Jen duonon de miaj posedaĵoj, Sinjoro, mi donacas al
la malriĉuloj; kaj se el iu mi maljuste eldevigis ion,
mi redonas kvaroblon. 9 Kaj Jesuo diris al li: Hodiaŭ
venis savo al ĉi tiu domo, ĉar li ankaŭ estas filo de
Abraham. 10 Ĉar la Filo de homo venis, por serĉi kaj
savi la perditaĵon. 11 Kaj kiam oni aŭdis tion, li parolis
ankoraŭ parabolon, ĉar li estis proksime al Jerusalem,
kaj oni supozis, ke la regno de Dio tuj aperos. 12 Li do
diris: Unu nobelo forvojaĝis en malproksiman landon,
por ricevi al si regnon, kaj reveni. 13 Kaj vokinte al si
dek siajn servistojn, li donis al ili dek min'ojn, kaj diris
al ili: Negocadu, ĝis mi revenos. 14 Sed liaj regnanoj
lin malamis, kaj sendis delegitaron post li, dirante:
Ni ne volas, ke tiu viro reĝu super ni. 15 Kaj kiam li
revenis, ricevinte la regnon, li ordonis voki al li tiujn
servistojn, al kiuj li donis la monon, por ke li sciiĝu,
kiom ili gajnis per negocado. 16 Kaj venis la unua,
kaj diris: Sinjoro, via min'o produktis dek min'ojn. 17
Kaj li diris al li: Bonege, bona servisto; ĉar vi estis
fidela en tre malgranda afero, havu aŭtoritaton super
dek urboj. 18 Kaj venis la dua, kaj diris: Sinjoro, via
min'o faris kvin min'ojn. 19 Li diris ankaŭ al tiu:
Vi ankaŭ estu super kvin urboj. 20 Kaj alia venis,
kaj diris: Sinjoro, jen via min'o, kiun mi konservis,
flankemetitan en viŝtuko; 21 ĉar mi vin timis, ĉar vi
estas homo severa; vi prenas tion, kion vi ne demetis,
kaj rikoltas tion, kion vi ne semis. 22 Li diris al li: El
via propra buŝo mi vin juĝos, vi malbona servisto. Vi
sciis, ke mi estas homo severa, kiu prenas tion, kion
mi ne demetis, kaj rikoltas tion, kion mi ne semis; 23
kial do vi ne donis mian monon en bankon, por ke,
reveninte, mi postulu ĝin kun procento? 24 Kaj li diris
al la apudstarantoj: Forprenu de li la min'on, kaj donu
ĝin al tiu, kiu havas la dek min'ojn. 25 (Kaj ili diris al
li: Sinjoro, li havas dek min'ojn.) 26 Mi diras al vi, ke al
ĉiu, kiu havas, estos donite; kaj for de tiu, kiu ne havas,
estos prenita eĉ tio, kion li havas. 27 Cetere tiujn

miajn malamikojn, kiuj ne volis, ke mi reĝu super ili,
konduku ĉi tien, kaj mortigu ilin antaŭ mi. 28 Kaj tion
dirinte, li ekiris antaŭe, suprenirante al Jerusalem.
29 Kaj kiam li alproksimiĝis al Betfage kaj Betania,
apud la monto nomata Olivarba, li sendis du el siaj
disĉiploj, 30 dirante: Iru en la kontraŭan vilaĝon, en
kiu, enirante, vi trovos azenidon ligitan, sur kiu neniu
iam ankoraŭ sidis; ĝin malligu kaj alkonduku. 31 Kaj
se iu demandos al vi: Kial vi ĝin malligas? parolu jene:
La Sinjoro ĝin bezonas. 32 Kaj la senditoj foriris, kaj
trovis, ĝuste kiel li diris al ili. 33 Kaj dum ili malligis la
azenidon, ĝiaj posedantoj diris al ili: Kial vi malligas
la azenidon? 34 Kaj ili diris: La Sinjoro ĝin bezonas.
35 Kaj ili alkondukis ĝin al Jesuo; kaj ĵetinte siajn
vestojn sur la azenidon, ili sidigis Jesuon sur ĝin. 36
Kaj dum li iris, ili sternis siajn vestojn sur la vojo.
37 Kaj kiam li jam alproksimiĝis, malsuprenironte la
deklivon de la monto Olivarba, la tuta amaso de la
disĉiploj komencis ĝoji kaj laŭdi Dion per laŭta voĉo
pro ĉiuj potencaĵoj, kiujn ili vidis; 38 dirante: Estu
benata la Reĝo, kiu venas en la nomo de la Eternulo;
paco en la ĉielo kaj gloro en la supera alto. 39 Kaj iuj
Fariseoj el la homamaso diris al li: Majstro, admonu
viajn disĉiplojn. 40 Kaj responde li diris: Mi diras
al vi, ke se ĉi tiuj silentos, la ŝtonoj ekkrios. 41 Kaj
kiam li alproksimiĝis, li rigardis la urbon, kaj ploris
pro ĝi, 42 dirante: Ho, se vi mem scius en ĉi tiu tago
la aferojn apartenantajn al paco! sed nun ili estas
kaŝitaj for de viaj okuloj. 43 Ĉar venos sur vin tagoj,
kiam viaj malamikoj ĉirkaŭbaros vin per palisaro,
kaj ronde ĉirkaŭos vin, kaj ĉiuflanke premos vin, 44
kaj detruos ĝis la tero vin, kaj viajn infanojn en vi,
kaj ne lasos en vi ŝtonon sur ŝtono, pro tio, ke vi ne
sciis la tempon de via vizitado. 45 Kaj enirinte en la
templon, li komencis elpeli la vendantojn, 46 dirante
al ili: Estas skribite: Mia domo estos domo de preĝo;
sed vi faris ĝin kaverno de rabistoj. 47 Kaj li instruis
tagon post tago en la templo. Sed la ĉefpastroj kaj la
skribistoj kaj la ĉefoj de la popolo penadis lin pereigi,
48 kaj ne trovis, kion fari, ĉar la tuta popolo tre atente
aŭskultis lin.

**20** Kaj en unu el la tagoj, dum li instruis la popolon
en la templo kaj predikis la evangelion, la
ĉefpastroj kaj la skribistoj venis kun la pliaĝuloj; 2 kaj
ili ekparolis, dirante al li: Diru al ni: Laŭ kia aŭtoritato
vi ĉi tion faras? aŭ kiu estas tiu, kiu donis al vi tian
aŭtoritaton? 3 Kaj responde li diris al ili: Mi ankaŭ
faros al vi demandon, kaj diru al mi: 4 La baptado de
Johano, ĉu ĝi estis el la ĉielo, aŭ el homoj? 5 Kaj ili
diskutis inter si, dirante: Se ni diros: El la ĉielo; li diros:
Kial vi ne kredis al li? 6 Sed se ni diros: El homoj; la
tuta popolo ŝtonmortigos nin, ĉar ili estas konvinkitaj,
ke Johano estis profeto. 7 Kaj ili respondis, ke ili ne
scias, de kie ĝi estis. 8 Kaj Jesuo diris al ili: Kaj mi ne
diras al vi, laŭ kia aŭtoritato mi faras ĉi tion. 9 Kaj
li komencis paroli al la popolo la jenan parabolon:
Unu viro plantis vinberĝardenon, kaj luigis ĝin al
kultivistoj, kaj forvojaĝis por longa tempo. 10 Kaj en la
ĝusta tempo li sendis sklavon al la kultivistoj, por ke ili
donu al li el la frukto de la vinberejo; sed la kultivistoj
skurĝis lin, kaj forsendis lin senhava. 11 Kaj li sendis
ankoraŭ alian sklavon, kaj lin ankaŭ ili skurĝis kaj
malhonoris, kaj forsendis lin senhava. 12 Kaj li sendis
ankoraŭ trian, kaj lin ankaŭ ili vundis kaj elĵetis. 13
Kaj la sinjoro de la vinberejo diris: Kion mi faru? Mi
sendos mian amatan filon; eble lin ili respektos. 14
Sed kiam la kultivistoj lin vidis, ili diskutis unu kun
alia, dirante: Ĉi tiu estas la heredonto; ni lin mortigu,
por ke la heredaĵo fariĝu nia. 15 Kaj ili elĵetis lin el
la vinberejo kaj lin mortigis. Kion do faros al ili la
sinjoro de la vinberejo? 16 Li venos kaj pereigos ĉi
tiujn kultivistojn, kaj donos la vinberejon al aliaj. Kaj
aŭdinte tion, ili diris: Ne tiel estu. 17 Sed li, rigardante
ilin, diris: Kio do estas la jena skribitaĵo: Ŝtono, kiun
malŝatis la konstruantoj, Fariĝis ŝtono bazangula?
18 Ĉiu, kiu falas sur tiun ŝtonon, rompiĝos; sed sur
kiun ĝi falos, tiun ĝi polvigos. 19 Kaj la skribistoj kaj
ĉefpastroj celis meti manojn sur lin en tiu sama horo,
kaj ili timis la popolon; ĉar ili eksciis, ke kontraŭ ili
li parolis ĉi tiun parabolon. 20 Kaj ili observis lin,
kaj elsendis spionojn, kiuj ŝajnigis sin justaj, por ke
ili ekkaptu lian parolon, celante transdoni lin al la
potenco kaj aŭtoritato de la provincestro. 21 Kaj ili
demandis lin, dirante: Majstro, ni scias, ke vi prave
parolas kaj instruas, kaj ne akceptas ies personon, sed
instruas laŭ vero la vojon de Dio: 22 Ĉu konvenas al ni
doni tributon al Cezaro, aŭ ne? 23 Sed sciante ilian
ruzecon, li diris al ili: 24 Montru al mi denaron. Kies
bildon kaj surskribaĵon ĝi portas? Kaj ili respondis: De
Cezaro. 25 Kaj li diris al ili: Tial redonu al Cezaro la
propraĵon de Cezaro, kaj al Dio la propraĵon de Dio. 26
Kaj ili ne povis ekkapti la diron antaŭ la popolo; kaj
ili miris pro lia respondo, kaj silentis. 27 Kaj venis

iuj el la Sadukeoj, kiuj diras, ke ne estas releviĝo; kaj
ili demandis lin, 28 dirante: Majstro, Moseo skribis
por ni, ke, se ies frato mortos, havante edzinon, kaj li
estas seninfana, lia frato prenu la edzinon kaj naskigu
idaron al sia frato. 29 Estis do sep fratoj; kaj la unua
edziĝis, kaj mortis seninfana; 30 ankaŭ la dua; 31 kaj
la tria ŝin prenis; kaj tiel same ankaŭ la sep ne lasis
infanojn, kaj mortis. 32 Laste mortis ankaŭ la virino.
33 En la releviĝo do por kiu el ili ŝi estos edzino? ĉar la
sep havis ŝin kiel edzinon. 34 Kaj Jesuo diris al ili: La
filoj de ĉi tiu mondo edziĝas kaj estas edzigataj; (aiōn
g165) 35 sed kiuj estas juĝitaj indaj atingi tiun mondon
kaj la releviĝon el la mortintoj, tiuj nek edziĝas nek
edziniĝas; (aiōn g165) 36 ĉar ili ne plu povas morti; ĉar
ili estas egalaj kun la anĝeloj, kaj estas filoj de Dio,
estante filoj de la releviĝo. 37 Sed ke la mortintoj
leviĝas, Moseo mem montris en la arbetaĵo, kiam
li nomis la Eternulon la Dio de Abraham kaj la Dio
de Isaak kaj la Dio de Jakob. 38 Li estas Dio ne de
mortintoj, sed de la vivantoj, ĉar ĉiuj vivas al Li. 39
Kaj iuj el la skribistoj responde diris: Majstro, vi bone
diris. 40 Kaj ili ne plu kuraĝis fari al li demandon. 41
Kaj li diris al ili: Kiel oni diras, ke la Kristo estas filo
de David? 42 Ĉar David mem diras en la Psalmaro: La
Eternulo diris al mia Sinjoro: Sidu dekstre de Mi, 43
Ĝis Mi faros viajn malamikojn benketo por viaj piedoj.
44 Tial David nomas lin Sinjoro, kaj kiamaniere li estas
lia filo? 45 Kaj dum la tuta popolo aŭskultis, li diris al
siaj disĉiploj: 46 Gardu vin kontraŭ la skribistoj, kiuj
amas promenadi en roboj kaj amas salutojn sur la
placoj, kaj ĉefseĝojn en la sinagogoj, kaj ĉeflokojn ĉe
festenoj; 47 kaj kiuj formanĝas domojn de vidvinoj, kaj
por preteksto longe preĝas. Ĉi tiuj ricevos pli severan
kondamnon.

**21** Kaj ekrigardante, li vidis riĉulojn enĵetantajn
siajn donacojn en la monkeston. 2 Kaj li vidis
unu malriĉan vidvinon enĵetantan tien du leptojn. 3
Kaj li diris: Vere mi diras al vi: Ĉi tiu malriĉa vidvino
enĵetis pli multe ol ĉiuj; 4 ĉar ĉiuj tiuj el sia abundo
enĵetis en la donacaron; sed ŝi el sia malmultego
enĵetis la tutan vivrimedon, kiun ŝi havis. 5 Kaj kiam
iuj parolis pri la templo, ke ĝi estas ornamita per belaj
ŝtonoj kaj oferdonoj, li diris: 6 Rilate al tio, kion vi
vidas, venos tagoj, en kiuj ne estos lasita ĉi tie ŝtono
sur ŝtono, kiu ne estos deĵetita. 7 Kaj ili demandis lin,
dirante: Majstro, kiam do tio estos? kaj kio estos la
signo, kiam tio estos proksima? 8 Kaj li diris: Gardu
vin, ke vi ne estu erarigitaj; ĉar multaj venos en mia
nomo, dirante: Mi estas; kaj: La tempo proksimiĝis; ne
sekvu ilin. 9 Kaj kiam vi aŭdos pri militoj kaj tumultoj,
ne teruriĝu; ĉar tio devas okazi unue, sed ne tuj estos
la fino. 10 Tiam li diris al ili: Leviĝos nacio kontraŭ
nacio, kaj regno kontraŭ regno; 11 kaj estos grandaj
tertremoj, kaj en diversaj lokoj malsatoj kaj pestoj;
kaj estos teruraĵoj kaj grandaj signoj el la ĉielo. 12
Sed antaŭ ĉio tio oni metos sur vin siajn manojn kaj
persekutos vin, transdonante vin al la sinagogoj kaj
malliberejoj, kaj kondukante vin antaŭ reĝojn kaj
provincestrojn pro mia nomo. 13 Tio fariĝos por vi
atesto. 14 Decidu tial en viaj koroj, ne prizorgi antaŭe
pri pleda respondo; 15 ĉar mi donos al vi buŝon kaj
saĝon, kiun ĉiuj viaj atakantoj ne povos rezisti nek
kontraŭdiri. 16 Sed vi estos transdonitaj eĉ de gepatroj
kaj fratoj kaj parencoj kaj amikoj; kaj iujn el vi oni
mortigos. 17 Kaj vi estos malamataj de ĉiuj pro mia
nomo. 18 Kaj eĉ unu haro de via kapo ne pereos. 19
Per via pacienco vi akiros viajn animojn. 20 Sed kiam
vi vidos Jerusalemon ĉirkaŭitan de armeoj, tiam sciu,
ke ĝia ruiniĝo alproksimiĝis. 21 Tiam, kiuj estas en
Judujo, tiuj forkuru al la montoj; kaj kiuj estas en
ĝia mezo, tiuj elmigru; kaj kiuj estas sur la kamparo,
tiuj ne eniru tien. 22 Ĉar tiuj estas tagoj de punado,
por ke plenumiĝu ĉio, kio estas skribita. 23 Ve al la
gravedulinoj kaj al la suĉigantinoj en tiuj tagoj! ĉar
estos granda manko sur la tero, kaj kolero kontraŭ ĉi
tiu popolo. 24 Kaj ili falos per tranĉrando de glavo,
kaj forkaptiĝos en ĉiujn naciojn; kaj Jerusalem estos
piedpremata de la nacianoj, ĝis plenumiĝos la tempoj
de la nacianoj. 25 Kaj estos signoj en la suno kaj la
luno kaj la steloj, kaj sur la tero mizero de nacioj,
konsternitaj de la muĝado de la maro kaj la ondegoj;
26 homoj malfortiĝos de timo kaj de atendado de tio,
kio venos sur la mondon; ĉar la potencoj de la ĉielo
ŝanceliĝos. 27 Kaj tiam oni vidos la Filon de homo,
venantan en nubo kun potenco kaj granda gloro. 28
Sed kiam tio komencos okazi, rigardu supren kaj levu
viajn kapojn, ĉar via elaĉeto alproksimiĝas. 29 Kaj li
parolis al ili parabolon: Rigardu la figarbon kaj ĉiujn
arbojn; 30 kiam ili ekkreskigas foliojn, vi ekvidas, kaj
el vi mem scias, ke la somero jam estas proksima. 31
Tiel same vi, kiam vi vidos, ke tio okazas, tiam sciu, ke
la regno de Dio estas proksima. 32 Vere mi diras al vi:
Ĉi tiu generacio ne forpasos, ĝis ĉio plenumiĝos. 33 La

ĉielo kaj la tero forpasos, sed miaj vortoj ne forpasos.
34 Sed gardu vin, por ke viaj koroj ne estu ŝarĝitaj de
trosatiĝo kaj ebrieco kaj zorgoj pri vivrimedoj, kaj por
ke tiu tago ne venu al vi subite; 35 ĉar kiel kaptilo ĝi
venos sur ĉiujn, kiuj loĝas sur la supraĵo de la tero.
36 Sed viglu en ĉiu tempo, preĝante, ke prosperu al
vi saviĝi de ĉio, kio okazos, kaj stari antaŭ la Filo de
homo. 37 Kaj dum la tagoj li instruis en la templo,
kaj ĉiunokte li eliris, kaj loĝis sur la monto nomata
Olivarba. 38 Kaj la tuta popolo venis al li frumatene
en la templo, por aŭskulti lin.

**22** Jam alproksimiĝis la festo de macoj, kiu estas
nomata la Pasko. 2 Kaj la ĉefpastroj kaj la
skribistoj serĉis, kiamaniere ili povu mortigi lin, ĉar
ili timis la popolon. 3 Kaj Satano eniris en Judason,
nomatan Iskariota, kiu estis el la nombro de la dek
du. 4 Kaj li foriris kaj interparolis kun la ĉefpastroj
kaj kapitanoj, kiamaniere transdoni lin al ili. 5 Kaj
ili ĝojis, kaj konsentis doni al li monon. 6 Kaj li
promesis, kaj serĉis okazon transdoni lin al ili, for
de la homamaso. 7 Kaj venis la tago de macoj, kiam
oni devis buĉi la Paskon. 8 Kaj li sendis Petron kaj
Johanon, dirante: Iru kaj pretigu por ni la Paskon, por
ke ni ĝin manĝu. 9 Kaj ili diris al li: Kie vi volas, ke ni
pretigu? 10 Kaj li diris al ili: Jen kiam vi estos enirintaj
en la urbon, vin renkontos viro, portanta kruĉon da
akvo; lin sekvu en la domon, en kiun li eniros. 11
Kaj vi diros al la domomastro: La Majstro diras: Kie
estas la gastoĉambro, en kiu mi manĝos la Paskon kun
miaj disĉiploj? 12 Kaj li montros al vi grandan supran
ĉambron aranĝitan; tie pretigu. 13 Kaj ili iris kaj trovis
tiel, kiel li diris al ili; kaj ili pretigis la Paskon. 14 Kaj
kiam alvenis la horo, li sidiĝis, kaj la apostoloj kun li.
15 Kaj li diris al ili: Kun deziro mi deziris manĝi ĉi tiun
Paskon kun vi, antaŭ ol mi suferos; 16 ĉar mi diras al
vi: Mi ne manĝos ĝin, antaŭ ol ĝi plenumiĝos en la
regno de Dio. 17 Kaj ricevinte kalikon, kaj doninte
dankon, li diris: Ĉi tion prenu kaj dividu inter vi; 18
ĉar mi diras al vi: De nun mi ne trinkos el la frukto
de la vinberarbo, ĝis venos la regno de Dio. 19 Kaj li
prenis panon, kaj doninte dankon, li ĝin dispecigis kaj
donis al ili, dirante: Ĉi tio estas mia korpo, kiu estas
donita por vi; ĉi tion faru por memorigo pri mi. 20
Sammaniere ankaŭ la kalikon post la vespermanĝo,
dirante: Ĉi tiu kaliko estas la nova interligo en mia
sango, kiu estas elverŝata por vi. 21 Sed jen la mano
de tiu, kiu min perfidas, estas apud mi sur la tablo.
22 Ĉar la Filo de homo ja iros, laŭ la antaŭdecido;
sed ve al tiu viro, de kiu li estos perfidata! 23 Kaj ili
komencis diskuti inter si: kiu el ili faros tion. 24 Kaj
fariĝis ankaŭ inter ili disputo: kiun el ili oni opinias la
plej granda. 25 Kaj li diris al ili: La reĝoj de la nacianoj
faras sin sinjoroj super ili; kaj tiujn, kiuj potencas
inter ili, oni nomas Bonfarantoj. 26 Sed vi ne estu tiaj;
sed kiu estas la pli granda el vi, tiu fariĝu kiel la pli
juna; kaj tiu, kiu estas ĉefa, kiel la servanto. 27 Ĉar
kiu estas la pli granda, la sidanto ĉe manĝo, aŭ la
servanto? ĉu ne la sidanto ĉe manĝo? sed mi estas
meze de vi kiel la servanto. 28 Sed vi estas tiuj, kiuj
restadis apud mi en miaj tentoj; 29 kaj mi difinas por
vi regnon, kiel mia Patro difinis por mi; 30 por ke
vi manĝu kaj trinku ĉe mia tablo en mia regno, kaj
sidu sur tronoj, juĝante la dek du tribojn de Izrael.
31 Simon, Simon, jen Satano postulis vin ĉiujn, por
kribri kiel tritikon; 32 sed mi preĝis por vi, ke via
fido ne ŝanceliĝu; kaj vi, kiam vi konvertiĝos, firmigu
viajn fratojn. 33 Kaj li diris al li: Sinjoro, vin mi estas
preta akompani eĉ al malliberejo kaj al morto. 34 Kaj
li diris: Mi diras al vi, Petro, koko ne krios hodiaŭ,
antaŭ ol vi trifoje malkonfesos, ke vi min konas. 35
Kaj li diris al ili: Kiam mi vin elsendis sen monujo
kaj sako kaj ŝuoj, ĉu io mankis al vi? 36 Kaj ili diris:
Nenio. Kaj li diris al ili: Sed nun kiu havas monujon,
tiu prenu ĝin, kaj ankaŭ sakon; kaj kiu ne havas, tiu
vendu sian mantelon kaj aĉetu glavon. 37 Ĉar mi diras
al vi, ke tio, kio estas skribita, devas plenumiĝi pri
mi: Kaj li estis alkalkulita al krimuloj; ĉar tio, kio
rilatas al mi, havas sian finon. 38 Kaj ili diris: Sinjoro,
jen estas du glavoj; kaj li diris al ili: Sufiĉas. 39 Kaj
elirinte, li iris laŭ sia kutimo al la monto Olivarba, kaj
la disĉiploj lin sekvis. 40 Kaj veninte al la loko, li diris
al ili: Preĝu, ke vi ne eniru en tenton. 41 Kaj li iris for
de ili proksimume ŝtonĵeton, kaj li genuis, kaj preĝis,
42 dirante: Patro, se Vi volas, formetu de mi ĉi tiun
kalikon; tamen plenumiĝu ne mia volo, sed Via. 43 Kaj
aperis antaŭ li anĝelo el la ĉielo, fortigante lin. 44 Kaj
estante en agonio, li preĝis pli fervore, kaj lia ŝvito
fariĝis kiel gutoj da sango, defalantaj sur la teron. 45
Kaj leviĝinte post la preĝo, li venis al la disĉiploj kaj
trovis ilin dormantaj de malĝojo, 46 kaj diris al ili:
Kial vi dormas? leviĝu kaj preĝu, ke vi ne eniru en
tenton. 47 Dum li ankoraŭ parolis, jen homamaso;
kaj tiu, kiu estis nomata Judas, unu el la dek du, iris

antaŭ ili, kaj alproksimiĝis al Jesuo, por kisi lin. 48 Sed
Jesuo diris al li: Judas, ĉu vi perfidas per kiso la Filon
de homo? 49 Kaj kiam tiuj, kiuj ĉirkaŭis lin, vidis,
kio sekvos, ili diris: Sinjoro, ĉu ni frapu per glavo?
50 Kaj unu el ili frapis la sklavon de la ĉefpastro, kaj
detranĉis lian dekstran orelon. 51 Sed Jesuo responde
diris: Permesu tiom. Kaj li tuŝis lian orelon kaj sanigis
lin. 52 Kaj Jesuo diris al la ĉefpastroj kaj kapitanoj
de la templo kaj pliaĝuloj, kiuj venis kontraŭ lin: Ĉu
vi elvenis kun glavoj kaj bastonoj, kvazaŭ kontraŭ
rabiston? 53 Kiam mi estis ĉiutage inter vi en la
templo, vi ne etendis kontraŭ min viajn manojn; sed
ĉi tiu estas via horo, kaj la potenco de mallumo. 54
Kaj ili kaptis lin, kaj forkondukinte, venigis lin en la
domon de la ĉefpastro. Sed Petro sekvis malproksime.
55 Kaj kiam oni ekbruligis fajron meze de la korto
kaj sidis kune, Petro sidiĝis meze de ili. 56 Kaj unu
servantino, vidante lin sidantan en la fajrolumo, kaj
fikse rigardinte lin, diris: 57 Ĉi tiu ankaŭ estis kun li.
Sed li malkonfesis, dirante: Virino, mi lin ne konas.
58 Kaj post iom da tempo alia vidis lin, kaj diris: Vi
ankaŭ estas el ili. Sed Petro diris: Viro, mi ne estas.
59 Kaj post la daŭro de unu horo proksimume, alia
asertis persiste, dirante: Vere, ĉi tiu ankaŭ estis kun
li, ĉar li estas Galileano. 60 Sed Petro diris: Viro, mi ne
scias, kion vi diras. Kaj tuj, dum li ankoraŭ parolis, la
koko kriis. 61 Kaj la Sinjoro sin turnis, kaj alrigardis
Petron. Kaj Petro ekmemoris la vorton de la Sinjoro,
ke li diris al li: Antaŭ ol koko krios hodiaŭ, vi trifoje
min malkonfesos. 62 Kaj li eliris, kaj maldolĉe ploris.
63 Kaj tiuj, kiuj gardis Jesuon, lin mokis kaj batis. 64 Kaj
ili ĉirkaŭkovris lin, kaj demandis lin, dirante: Profetu,
kiu vin frapis? 65 Kaj per multaj aliaj insultoj ili parolis
kontraŭ li. 66 Kaj tuj kiam tagiĝis la pliaĝularo de la
popolo kunvenis, kaj ĉefpastroj kaj skribistoj, kaj ili
forkondukis lin antaŭ sian sinedrion, kaj diris: 67 Se
vi estas la Kristo, diru al ni. Sed li diris al ili: Se mi
diros al vi, vi ne kredos; 68 kaj se mi demandos, vi ne
respondos. 69 Tamen, de nun la Filo de homo sidos
dekstre de la Potenco de Dio. 70 Kaj ili ĉiuj demandis:
Ĉu vi do estas la Filo de Dio? Kaj li respondis: Vi diras,
ke mi estas. 71 Kaj ili diris: Pro kio ni bezonas pluan
atestadon? ĉar ni mem aŭdis el lia propra buŝo.

**23** Kaj la tuta ĉeestantaro leviĝis, kaj kondukis lin
antaŭ Pilaton. 2 Kaj ili komencis akuzi lin, dirante:
Ni trovis ĉi tiun viron erariganta nian nacion, kaj
malpermesanta pagi tributon al Cezaro, kaj diranta,
ke li mem estas Kristo, reĝo. 3 Kaj Pilato demandis
lin, dirante: Ĉu vi estas la Reĝo de la Judoj? Kaj li
responde al li diris: Vi diras. 4 Kaj Pilato diris al la
ĉefpastroj kaj homamasoj: Mi trovas nenian kulpon en
ĉi tiu viro. 5 Sed ili insistis, dirante: Li malkvietigas la
popolon, instruante tra la tuta Judujo, kaj komencante
de Galileo, eĉ ĝis ĉi tie. 6 Sed kiam Pilato tion aŭdis,
li demandis, ĉu la viro estas Galileano. 7 Kaj kiam li
sciiĝis, ke li estas el sub la aŭtoritato de Herodo, li
sendis lin al Herodo, kiu ankaŭ ĉeestis en Jerusalem
en tiuj tagoj. 8 Sed Herodo, vidinte Jesuon, treege
ĝojis; ĉar de longe li deziris vidi lin, ĉar li jam aŭdis
pri li, kaj li esperis vidi ian signon, faritan de li. 9 Kaj
li demandis lin per multaj vortoj, sed li respondis al
li nenion. 10 Kaj la ĉefpastroj kaj la skribistoj staris,
forte lin akuzante. 11 Kaj Herodo kaj liaj soldatoj
malhonoris lin kaj mokis lin, kaj vestinte lin per
brilaj vestoj, li resendis lin al Pilato. 12 Kaj Herodo
kaj Pilato fariĝis amikoj unu kun la alia en tiu sama
tago; ĉar antaŭe ili havis inter si malamon. 13 Kaj
Pilato, kunvokinte la ĉefpastrojn kaj la regantojn kaj
la popolon, 14 diris al ili: Vi alkondukis antaŭ min
ĉi tiun viron, kiel erarigantan la popolon; kaj jen
ekzameninte lin antaŭ vi, mi trovis nenian kulpon
en ĉi tiu viro rilate tion, pri kio vi lin akuzas; 15 nek
Herodo ankaŭ, ĉar li resendis lin al ni; kaj jen nenio
inda je morto estas farita de li. 16 Tial mi lin skurĝos
kaj liberigos. 17 Ĉar li devis liberigi unu al ili dum la
festo. 18 Sed amase ili kriis, dirante: Forigu lin, kaj
liberigu al ni Barabason; 19 kiu pro ribelado farita en
la urbo, kaj pro mortigo, estis ĵetita en malliberejon.
20 Kaj Pilato, volante liberigi Jesuon, denove parolis al
ili; 21 sed ili laŭte kriis, dirante: Krucumu, krucumu
lin. 22 Kaj la trian fojon li diris al ili: Kial? kian
malbonon faris ĉi tiu? mi trovis en li nenion indan
je morto; mi do lin skurĝos kaj liberigos. 23 Sed ili
insistis per grandaj krioj, postulante krucumi lin. Kaj
iliaj krioj superfortis. 24 Kaj Pilato donis juĝon, ke
plenumiĝu ilia postulo. 25 Kaj li liberigis tiun, kiu pro
ribelado kaj mortigo estis ĵetita en malliberejon, kaj
kiun ili postulis; sed Jesuon li transdonis al ilia volo.
26 Kaj kiam ili forkondukis lin, ili kaptis Simonon,
Kirenanon, venantan de la kamparo, kaj metis sur lin
la krucon, por porti ĝin post Jesuo. 27 Kaj sekvis lin
granda amaso de la popolo, kaj de virinoj, kiuj ĝemis
kaj lamentis pro li. 28 Sed Jesuo, turninte sin al ili,

diris: Filinoj de Jerusalem, ne ploru pro mi, sed ploru
pro vi kaj pro viaj infanoj. 29 Ĉar jen venas tagoj, kiam
oni diros: Feliĉaj estas la senfruktaj, kaj la ventroj
ne naskintaj, kaj la mamoj ne nutrintaj. 30 Tiam oni
komencos diri al la montoj: Falu sur nin; kaj al la
montetoj: Kovru nin. 31 Ĉar se oni tiel agas en la suka
ligno, kiel oni agos en la seka? 32 Kaj estis kondukataj
kun li ankaŭ aliaj du, krimuloj, por esti mortigitaj. 33
Kaj kiam ili alvenis al la loko nomata Kranio, tie ili
krucumis lin, kaj la krimulojn, unu dekstre kaj unu
maldekstre. 34 Kaj Jesuo diris: Patro, pardonu ilin;
ĉar ili ne scias, kion ili faras. Kaj dividante inter si
liajn vestojn, ili ĵetis lotojn. 35 Kaj la popolo staris,
rigardanta. Kaj la regantoj ankaŭ mokis lin, dirante:
Aliajn li savis: li savu sin mem, se ĉi tiu estas la Kristo
de Dio, la elektito. 36 Kaj ŝercis pri li ankaŭ la soldatoj,
venante al li kaj proponante al li vinagron, 37 kaj
dirante: Se vi estas la Reĝo de la Judoj, savu vin.
38 Kaj estis ankaŭ surskribo super li: ĈI TIU ESTAS
LA REĜO DE LA JUDOJ. 39 Kaj unu el la pendigitaj
krimuloj insultis lin, dirante: Ĉu vi ne estas la Kristo?
savu vin kaj nin. 40 Sed la alia responde admonis
lin, dirante: Ĉu vi eĉ ne timas Dion? ĉar vi estas en
la sama kondamno. 41 Kaj ni ja juste, ĉar ni ricevas
rekompencon, meritital pro niaj faroj; sed ĉi tiu faris
nenion malbonan. 42 Kaj li diris: Jesuo, memoru min,
kiam vi venos en vian regnon. 43 Kaj li diris al li: Vere
mi diras al vi: Hodiaŭ vi estos kun mi en Paradizo. 44
Kaj jam estis ĉirkaŭ la sesa horo, kaj fariĝis mallumo
sur la tuta lando ĝis la naŭa, ĉar la sunlumo mankis;
45 kaj la kurteno de la sanktejo disŝiriĝis en la mezo. 46
Kaj kriinte per laŭta voĉo, Jesuo diris: Patro, en Viajn
manojn mi transdonas mian spiriton; kaj tion dirinte,
li ellasis for la spiriton. 47 Kaj kiam la centestro vidis
la okazantaĵon, li gloris Dion, dirante: Ĉi tiu estis ja
justulo. 48 Kaj ĉiuj homamasoj, kiuj kunvenis al ĉi
tiu spektaklo, kiam ili vidis la okazintaĵojn, reiris,
frapante al si la bruston. 49 Kaj ĉiuj liaj konantoj, kaj la
virinoj, kiuj sekvis lin el Galileo, staris malproksime,
vidante tion. 50 Kaj jen viro nomata Jozef, kiu estis
konsilanto, viro bona kaj justa 51 (li ne konsentis al
ilia intenco kaj faro), el Arimateo, urbo de la Judoj,
kiu atendis la regnon de Dio, 52 irinte al Pilato, petis
la korpon de Jesuo. 53 Kaj li deprenis ĝin kaj envolvis
ĝin en tolaĵo, kaj metis lin en tombo, elhakita el
ŝtono, kie neniu antaŭe kuŝis. 54 Kaj estis la tago de la
Preparado, kaj la sabato eklumis. 55 Kaj la virinoj, kiuj
venis kun li el Galileo, sekvis, kaj vidis la tombon, kaj
kiamaniere la korpo estis metita. 56 Kaj ili reiris, kaj
preparis aromaĵojn kaj ŝmiraĵojn. Kaj sabate ili ripozis
laŭ la ordono.

24 Kaj la unuan tagon de la semajno, ĉe frua tagiĝo,
ili venis al la tombo, alportante la aromaĵojn,
kiujn ili preparis. 2 Kaj ili trovis la ŝtonon derulita for
de la tombo. 3 Kaj enirinte, ili ne trovis la korpon de
la Sinjoro Jesuo. 4 Kaj dum ili embarasiĝis pri tio, jen
apud ili staris du viroj en brilaj vestoj; 5 kaj dum ili
timis kaj kliniĝis vizaĝaltere, tiuj demandis ilin: Kial
vi serĉas la vivanton inter la mortintoj? 6 Li ne estas
ĉi tie, sed leviĝis; memoru, kiamaniere li parolis al
vi, kiam li estis ankoraŭ en Galileo, 7 dirante, ke la
Filo de homo devas esti transdonita en la manojn de
pekuloj kaj esti krucumita, kaj la trian tagon releviĝi.
8 Kaj ili rememoris liajn vortojn; 9 kaj reveninte de
la tombo, ili rakontis ĉion tion al la dek unu kaj al
ĉiuj ceteraj. 10 Kaj ili estis Maria Magdalena, kaj
Joana, kaj Maria, la patrino de Jakobo; kaj la ceteraj
virinoj kun ili rakontis tion al la apostoloj. 11 Kaj tiuj
vortoj ŝajnis al ili kiel babilado, kaj ili ne kredis al
la virinoj. 12 Sed Petro leviĝis kaj kuris al la tombo,
kaj kliniĝinte, vidis la tolaĵojn solajn, kaj li foriris,
mirante en si pri tio, kio okazis. 13 Kaj jen du el ili iris
en tiu sama tago al vilaĝo nomata Emaus, kiu estas
malproksime de Jerusalem sesdek stadiojn. 14 Kaj
ili interparolis inter si pri ĉio tio, kio okazis. 15 Kaj
dum ili interparolis kaj diskutis inter si, Jesuo mem
alproksimiĝis kaj iris kun ili. 16 Sed iliaj okuloj estis
malhelpataj tiel, ke ili lin ne rekonis. 17 Kaj li diris al
ili: Kiaj vortoj estas tiuj, kiujn vi interŝanĝas, dum
vi iras? Kaj ili haltis, kun malgaja mieno. 18 Kaj unu
el ili, nomata Kleopas, responde diris al li: Ĉu nur
vi sola loĝas en Jerusalem, kaj ne scias tion, kio tie
okazis en ĉi tiuj tagoj? 19 Kaj li diris al ili: Kion? Kaj ili
diris al li: Pri Jesuo, la Nazaretano, kiu estis profeto
potenca age kaj parole antaŭ Dio kaj la tuta popolo;
20 kaj kiel la ĉefpastroj kaj niaj regantoj transdonis
lin por kondamno al morto, kaj lin krucumis. 21 Sed
ni esperis, ke li estas tiu, kiu elaĉetos Izraelon. Kaj
plie, krom ĉio tio, hodiaŭ estas jam la tria tago, de
kiam tio okazis. 22 Ankaŭ mirigis nin iuj virinoj el
inter ni, kiuj estis frumatene apud la tombo, 23 kaj ne
trovinte lian korpon, revenis, dirante, ke ili ankaŭ
vidis vizion de anĝeloj, kiuj diris, ke li vivas. 24 Kaj iuj

el nia kunularo iris al la tombo, kaj trovis tiel, kiel
diris la virinoj; sed lin ili ne vidis. 25 Kaj li diris al ili:
Ho malsaĝuloj kaj kore malviglaj por kredi ĉion, kion
la profetoj antaŭparolis! 26 Ĉu la Kristo ne devis suferi
ĉion tion, kaj eniri en sian gloron? 27 Kaj komencante
de Moseo kaj de ĉiuj profetoj, li klarigis al ili el ĉiuj
Skriboj la dirojn pri li mem. 28 Kaj ili alproksimiĝis al
la vilaĝo, kien ili iris, kaj li ŝajnigis al ili, kvazaŭ li
pluen iros. 29 Kaj ili retenis lin, dirante: Restu ĉe ni,
ĉar estas preskaŭ vespere, kaj la tago jam malkreskas.
Kaj li eniris, por resti ĉe ili. 30 Kaj dum li sidis kun ili
ĉe manĝo, li prenis panon, kaj ĝin benis kaj dispecigis
kaj donis al ili. 31 Kaj iliaj okuloj malfermiĝis, kaj ili
rekonis lin, kaj li fariĝis nevidebla por ili. 32 Kaj ili
diris unu al alia: Ĉu nia koro ne brulis en ni, dum
li parolis kun ni sur la vojo, dum li klarigis al ni la
Skribojn? 33 Kaj leviĝinte en tiu sama horo, ili reiris
al Jerusalem, kaj trovis la dek unu kunvenintaj, kun
siaj kunuloj, kaj dirantaj: 34 La Sinjoro vere leviĝis, kaj
aperis al Simon. 35 Kaj ili rakontis tion, kio okazis
sur la vojo, kaj kiamaniere li rekoniĝis al ili en la
dispecigo de pano. 36 Kaj dum ili priparolis tion, li
mem staris meze de ili, kaj diris al ili: Paco al vi. 37 Sed
terurite kaj timigite, ili supozis, ke ili vidas spiriton.
38 Kaj li diris al ili: Kial vi maltrankviliĝas? kaj kial
diskutoj leviĝas en viaj koroj? 39 Vidu miajn manojn
kaj miajn piedojn, ke ĝi estas mi mem; palpu min kaj
vidu; ĉar spirito ne havas karnon kaj ostojn, kiel vi
vidas min havanta. 40 Kaj tion dirinte, li montris al ili
siajn manojn kaj siajn piedojn. 41 Kaj dum ili ankoraŭ
ne kredis pro ĝojo, kaj miris, li demandis ilin: Ĉu vi
havas ian manĝaĵon ĉi tie? 42 Kaj ili donis al li pecon
de rostita fiŝo. 43 Kaj li prenis, kaj manĝis antaŭ ili. 44
Kaj li diris al ili: Jen estas miaj vortoj, kiujn mi parolis
al vi, kiam mi ankoraŭ estis ĉe vi, ke devas plenumiĝi
ĉio, kio estas skribita pri mi en la leĝo de Moseo kaj
en la profetoj kaj en la psalmoj. 45 Tiam li malfermis
ilian menson, por ke ili komprenu la Skribojn; 46 kaj li
diris al ili: Tiel estas skribite, ke la Kristo devas suferi,
kaj leviĝi el la mortintoj la trian tagon; 47 kaj ke pento
kaj pardonado de pekoj estu predikataj en lia nomo
al ĉiuj nacioj, komencante ĉe Jerusalem. 48 Vi estas
atestantoj pri tio. 49 Kaj jen mi elsendos sur vin la
promeson de mia Patro; sed restu en la urbo, ĝis vi
vestiĝos per potenco de supre. 50 Kaj li elkondukis ilin
ĝis apud Betania, kaj, levinte siajn manojn, li benis
ilin. 51 Kaj dum li benis ilin, li foriĝis de ili kaj estis
suprenportita en la ĉielon. 52 Kaj adorkliniĝinte al li,
ili revenis al Jerusalem kun granda ĝojo; 53 kaj estis
konstante en la templo, glorante Dion.

# Johano

1 En la komenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis
kun Dio, kaj la Vorto estis Dio. 2 Tiu estis en la
komenco kun Dio. 3 Ĉio estiĝis per li; kaj aparte de li
estiĝis nenio, kio estiĝis. 4 En li estis la vivo, kaj la
vivo estis la lumo de la homoj. 5 Kaj la lumo brilas
en la mallumo, kaj la mallumo ĝin ne venkis. 6 De
Dio estis sendita viro, kies nomo estis Johano. 7 Tiu
venis kiel atestanto, por atesti pri la lumo, por ke
ĉiuj per li kredu. 8 Li ne estis la lumo, sed li venis,
por atesti pri la lumo. 9 Tio estis la vera lumo, kiu
lumas al ĉiu homo, venanta en la mondon. 10 Tiu
estis en la mondo, kaj la mondo per li estiĝis, kaj la
mondo lin ne konis. 11 Li venis al siaj propraĵoj, kaj
liaj propruloj lin ne akceptis. 12 Sed al ĉiuj, kiuj lin
akceptis, li donis la rajton fariĝi filoj de Dio, al la
kredantoj al lia nomo, 13 kiuj naskiĝis nek el sango,
nek el volo de karno, nek el volo de homo, sed el Dio.
14 Kaj la Vorto fariĝis karno kaj loĝis inter ni, kaj ni
vidis lian gloron, gloron kvazaŭ de la solenaskita de la
Patro, plena de graco kaj vero. 15 Johano atestis pri li,
kaj kriis, dirante: Ĉi tiu estas li, pri kiu mi diris: Kiu
venas post mi, tiu estas metita super mi, ĉar li ekzistis
pli frue ol mi. 16 Ĉar el lia pleneco ni ĉiuj ricevis,
kaj gracon post graco. 17 Ĉar la leĝo estis donita per
Moseo; la graco kaj la vero estiĝis per Jesuo Kristo. 18
Neniu iam vidis Dion; la solenaskita Filo, kiu estas en
la sino de la Patro, Lin deklaris. 19 Kaj jen estas la
atesto de Johano, kiam la Judoj sendis al li pastrojn
kaj Levidojn el Jerusalem, por demandi lin: Kiu vi
estas? 20 Kaj li konfesis kaj ne kaŝis; kaj li konfesis: Mi
ne estas la Kristo. 21 Kaj ili demandis lin: Kio do? Ĉu
vi estas Elija? Kaj li diris: Mi ne estas. Ĉu vi estas la
profeto? Kaj li respondis: Ne. 22 Ili do diris al li: Kiu vi
estas? por ke ni donu respondon al niaj sendintoj.
Kion vi diras pri vi mem? 23 Li diris: Mi estas voĉo de
krianto en la dezerto: Rektigu la vojon de la Eternulo,
kiel diris la profeto Jesaja. 24 Kaj tiuj estis senditaj
de la Fariseoj. 25 Kaj ili demandis lin, kaj diris al li:
Kial do vi baptas, se vi ne estas la Kristo, nek Elija,
nek la profeto? 26 Johano respondis al ili, dirante:
Mi baptas per akvo; meze de vi staras tiu, kiun vi ne
konas, 27 kiu venas post mi; la rimenon de lia ŝuo mi
ne estas inda malligi. 28 Tio okazis en Betania transe
de Jordan, kie Johano baptadis. 29 La sekvantan tagon
li vidis Jesuon venanta al li, kaj diris: Jen la Ŝafido
de Dio, kiu forportas la pekon de la mondo! 30 Li
estas tiu, pri kiu mi diris: Post mi venas viro, kiu estas
metita super mi, ĉar li ekzistis pli frue ol mi. 31 Kaj mi
lin ne konis; sed por ke li estu montrita al Izrael, tial
mi venis, baptante per akvo. 32 Kaj Johano atestis,
dirante: Mi vidis la Spiriton malsupreniranta de la
ĉielo kiel kolombo, kaj ĝi restis sur li. 33 Kaj mi lin ne
konis; sed kiu sendis min por bapti per akvo, Tiu diris
al mi: Sur kiun vi vidos la Spiriton malsupreniranta
kaj restanta sur li, tiu estas la baptanto per la Sankta
Spirito. 34 Kaj mi vidis, kaj atestis, ke ĉi tiu estas
la Filo de Dio. 35 Denove la sekvantan tagon staris
Johano, kaj du el liaj disĉiploj; 36 kaj rigardante Jesuon
promenantan, li diris: Jen la Ŝafido de Dio! 37 Kaj la
du disĉiploj aŭdis lin paroli, kaj sekvis Jesuon. 38 Kaj
Jesuo sin turnis, kaj vidis ilin sekvantajn, kaj diris al
ili: Kion vi serĉas? Kaj ili diris al li: Rabeno (tio estas,
Majstro), kie vi loĝas? 39 Li diris al ili: Venu, kaj vi
vidos. Ili do venis, kaj vidis, kie li loĝas, kaj ili restis ĉe
li tiun tagon; estis ĉirkaŭ la deka horo. 40 Unu el la
du, kiuj aŭdis Johanon kaj lin sekvis, estis Andreo, la
frato de Simon Petro. 41 Tiu unue trovis sian propran
fraton Simon, kaj diris al li: Ni trovis la Mesion (tio
estas, Kriston). 42 Li kondukis lin al Jesuo. Jesuo lin
rigardis, kaj diris: Vi estas Simon, filo de Jona; vi estos
nomata Kefas (tio estas, Petro). 43 La sekvantan tagon
li volis foriri en Galileon, kaj trovis Filipon; kaj Jesuo
diris al li: Sekvu min. 44 Filipo estis el Betsaida, la
urbo de Andreo kaj Petro. 45 Filipo trovis Natanaelon,
kaj diris al li: Ni trovis tiun, pri kiu skribis Moseo en
la leĝo, kaj la profetoj, Jesuon el Nazaret, filon de
Jozef. 46 Kaj Natanael diris al li: Ĉu io bona povas esti
el Nazaret? Filipo diris al li: Venu kaj vidu. 47 Jesuo
vidis Natanaelon venanta al li, kaj diris pri li: Jen vera
Izraelido, en kiu ne estas ruzeco! 48 Natanael diris al
li: Per kio vi min konas? Jesuo respondis kaj diris al li:
Antaŭ ol Filipo vin vokis, kiam vi estis sub la figarbo,
mi vin vidis. 49 Natanael respondis kaj diris al li:
Rabeno, vi estas la Filo de Dio; vi estas Reĝo de Izrael!
50 Jesuo respondis kaj diris al li: Ĉu vi kredas pro tio,
ke mi diris al vi: Mi vin vidis sub la figarbo? vi vidos
pli grandajn aferojn ol ĉi tio. 51 Kaj li diris al li: Vere,
vere, mi diras al vi, vi vidos la ĉielon malfermita kaj la
anĝelojn de Dio suprenirantaj kaj malsuprenirantaj
sur la Filon de homo.

2 La trian tagon okazis edziĝo en Kana Galilea, kaj la
patrino de Jesuo ĉeestis tie; 2 ankaŭ Jesuo kaj liaj
disĉiploj estis invititaj al la edziĝo. 3 Kaj kiam mankis
vino, la patrino de Jesuo diris al li: Ili ne havas vinon.
4 Kaj Jesuo diris al ŝi: Kio estas inter mi kaj vi, virino?
mia horo ankoraŭ ne venis. 5 Lia patrino diris al la
servantoj: Kion ajn li diros al vi, tion faru. 6 Kaj estis
tie ses akvokuvoj ŝtonaj, metitaj laŭ la purigo de la
Judoj, enhavantaj po du ĝis tri metretoj. 7 Jesuo diris
al ili: Plenigu la akvokuvojn per akvo. Kaj oni plenigis
ilin ĝis la rando. 8 Kaj li diris al ili: Ĉerpu nun, kaj
alportu al la festenestro. Kaj oni alportis. 9 Kiam la
festenestro gustumis la akvon, nun fariĝintan vino,
kaj ne sciis, de kie ĝi estas (sciis tamen la servantoj,
kiuj ĉerpis la akvon), la festenestro alvokis la fianĉon,
10 kaj diris al li: Ĉiu homo prezentas unue la bonan
vinon, kaj kiam oni jam drinkis, tiam la malpli bonan;
sed vi rezervis la bonan vinon ĝis nun. 11 Ĉi tiun
komencon de signoj Jesuo faris en Kana Galilea, kaj
elmontris sian gloron, kaj liaj disĉiploj kredis al li.
12 Post tio li malsupreniris al Kapernaum, kaj kun li
lia patrino kaj liaj fratoj kaj liaj disĉiploj; kaj tie ili
restis ne multajn tagojn. 13 Kaj la Pasko de la Judoj
alproksimiĝis, kaj Jesuo supreniris al Jerusalem. 14
Kaj li trovis en la templo vendistojn de bovoj kaj
ŝafoj kaj kolomboj, kaj la monŝanĝistojn sidantajn; 15
kaj farinte skurĝon el ŝnuretoj, li elpelis ĉiujn el la
templo, ŝafojn kaj bovojn; kaj elŝutis la monerojn de
la monŝanĝistoj kaj renversis la tablojn; 16 kaj al la
vendistoj de la kolomboj li diris: Forportu tion de ĉi
tie; ne faru la domon de mia Patro domo de komerco.
17 La disĉiploj rememoris, ke estis skribite: Fervoro pri
Via domo min konsumis. 18 La Judoj do respondis kaj
diris al li: Kian signon vi montras al ni, ĉar vi faras
tion? 19 Respondis Jesuo kaj diris al ili: Detruu ĉi tiun
sanktejon, kaj mi levos ĝin en la daŭro de tri tagoj. 20
La Judoj diris: Kvardek ses jarojn ĉi tiu sanktejo estis
konstruata; ĉu vi levos ĝin en la daŭro de tri tagoj? 21
Sed li parolis pri la sanktejo de sia korpo. 22 Kiam do
li leviĝis el la mortintoj, la disĉiploj rememoris, ke
li diris tion; kaj ili kredis la Skribon, kaj la vorton,
kiun Jesuo diris. 23 Kaj kiam li estis en Jerusalem ĉe la
Pasko, dum la festo, multaj fidis al lia nomo, vidante
la signojn, kiujn li faris. 24 Sed Jesuo ne konfidis sin al
ili, ĉar li konis ĉiujn, 25 kaj ne bezonis, ke iu atestu pri
la homo, ĉar li mem sciis, kio estas en la homo.

3 Estis viro el la Fariseoj, nomata Nikodemo, ĉefo
inter la Judoj; 2 tiu venis al li nokte, kaj diris al
li: Rabeno, ni scias, ke vi estas instruisto, veninta
de Dio; ĉar neniu povas fari tiujn signojn, kiujn vi
faras, se Dio ne estas kun li. 3 Jesuo respondis kaj
diris al li: Vere, vere, mi diras al vi: Se homo ne estas
denove naskita, li ne povas vidi la regnon de Dio. 4
Nikodemo diris al li: Kiel povas homo naskiĝi, kiam li
estas maljuna? ĉu li povas eniri denove en la ventron
de sia patrino kaj naskiĝi? 5 Jesuo respondis: Vere,
vere, mi diras al vi: Se homo ne estas naskita el akvo
kaj la Spirito, li ne povas eniri en la regnon de Dio. 6
Tio, kio naskiĝas el la karno, estas karno; kaj tio, kio
naskiĝas de la Spirito, estas spirito. 7 Ne miru, ke mi
diris al vi: Vi devas esti denove naskitaj. 8 La vento
blovas, kie ĝi volas, kaj ĝian voĉon vi aŭdas, sed vi ne
scias, de kie ĝi venas kaj kien ĝi iras; tia estas ĉiu, kiu
estas naskita de la Spirito. 9 Nikodemo respondis kaj
diris al li: Kiel povas tio fariĝi? 10 Jesuo respondis kaj
diris al li: Vi estas la instruisto de Izrael, kaj ĉu vi ne
scias tion? 11 Vere, vere, mi diras al vi: Kion ni scias,
tion ni parolas, kaj kion ni vidis, tion ni atestas; kaj
vi homoj ne akceptas nian ateston. 12 Se mi aferojn
surterajn diris al vi, kaj vi ne kredas, kiel vi kredos,
se mi diros enĉielajn? 13 Kaj neniu supreniris en la
ĉielon, krom tiu, kiu malsupreniris de la ĉielo, la Filo
de homo, kiu estas en la ĉielo. 14 Kaj kiel Moseo levis
la serpenton en la dezerto, tiel devas la Filo de homo
esti levita; 15 por ke ĉiu, fidanta al li, havu eternan
vivon. **(aiōnios g166)** 16 Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li
donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidas al
li, ne pereu, sed havu eternan vivon. **(aiōnios g166)** 17
Ĉar Dio sendis Sian Filon en la mondon, ne por juĝi la
mondon, sed por ke la mondo per li estu savita. 18 Kiu
fidas al li, tiu ne estas juĝata; sed la nekredanto jam
estas juĝita, ĉar li ne fidas al la nomo de la solenaskita
Filo de Dio. 19 Kaj jen estas la juĝo: ke la lumo venis
en la mondon, kaj la homoj amis la mallumon pli ol la
lumon, ĉar iliaj faroj estis malbonaj. 20 Ĉar ĉiu, kiu
faradas malbonon, malamas la lumon, kaj ne venas
al la lumo, por ke liaj faroj ne estu malaprobitaj. 21
Sed tiu, kiu faras la veron, venas al la lumo, por ke
liaj faroj estu montrataj, ke ili estas faritaj en Dio. 22
Post tio venis Jesuo kun siaj disĉiploj en la landon
Judujo, kaj restis tie kun ili kaj baptadis. 23 Johano
ankaŭ baptadis en Enon, proksime de Salim, ĉar estis
tie multe da akvoj; kaj oni alvenis kaj estis baptitaj. 24

Ĉar Johano ankoraŭ ne estis ĵetita en malliberejon. 25
Fariĝis do diskutado inter la disĉiploj de Johano kaj iu
Judo pri la puriĝo. 26 Kaj ili venis al Johano, kaj diris
al li: Rabeno, tiu, kiu estis kun vi transe de Jordan, kaj
pri kiu vi atestis, jen tiu sama baptas, kaj ĉiuj venas al
li. 27 Johano respondis kaj diris: Homo ne povas ion
ricevi, se ĝi ne estas donita al li el la ĉielo. 28 Vi mem
atestas pri mi, ke mi diris: Mi ne estas la Kristo, sed
mi estas sendita antaŭ li. 29 Kiu havas la fianĉinon,
tiu estas la fianĉo; sed la amiko de la fianĉo, kiu staras
kaj lin aŭdas, tre ĝojas pro la voĉo de la fianĉo; ĉi
tiu mia ĝojo do plenumiĝis. 30 Li devas altiĝi, sed mi
devas malaltiĝi. 31 Kiu de supre venas, tiu estas super
ĉiuj; kiu estas el la tero, tiu el la tero estas, kaj el la
tero parolas; kiu venas de la ĉielo, tiu estas super
ĉiuj. 32 Kion li vidis kaj aŭdis, tion li atestas; kaj neniu
akceptas lian ateston. 33 Kiu akceptis lian ateston,
tiu jam sigelis, ke Dio estas vera. 34 Ĉar tiu, kiun Dio
sendis, parolas la vortojn de Dio; ĉar ne laŭmezure Li
donas la Spiriton. 35 La Patro amas la Filon, kaj donis
ĉion en lian manon. 36 Kiu fidas al la Filo, tiu havas
eternan vivon; sed kiu ne obeas al la Filo, tiu ne vidos
vivon, sed la kolero de Dio sur li restas. **(aiōnios g166)**

**4** Kiam do la Sinjoro sciis, ke la Fariseoj aŭdis, ke
Jesuo faras kaj baptas pli multe da disĉiploj, ol
Johano 2 (kvankam baptadis ne Jesuo mem, sed liaj
disĉiploj), 3 li foriris el Judujo kaj reiris al Galileo. 4
Kaj li devis trairi tra Samario. 5 Li alvenis do al unu
urbo Samaria, nomata Siĥar, apud la terpeco, kiun
Jakob donis al sia filo Jozef; 6 kaj la fonto de Jakob
estis tie. Jesuo do, lacigita de sia vojirado, sidiĝis
tiamaniere apud la fonto. Estis ĉirkaŭ la sesa horo. 7
Venis virino Samaria, por ĉerpi akvon; Jesuo diris al
ŝi: Donu al mi trinki. 8 Ĉar liaj disĉiploj jam foriris en
la urbon, por aĉeti nutraĵojn. 9 La Samarianino do
diris al li: Kiel vi, estante Judo, petas trinki de mi, kiu
estas Samarianino? (Ĉar la Judoj ne interrilatas kun la
Samarianoj.) 10 Jesuo respondis kaj diris al ŝi: Se vi
scius la donacon de Dio, kaj kiu estas tiu, kiu diras al
vi: Donu al mi trinki, vi petus lin, kaj li donus al vi
vivan akvon. 11 La virino diris al li: Sinjoro, vi nenian
ĉerpilon havas, kaj la puto estas profunda; de kie do
vi havas tiun vivan akvon? 12 Ĉu vi estas pli granda ol
nia patro Jakob, kiu donis al ni la puton, kaj trinkis
mem el ĝi, kiel ankaŭ liaj filoj kaj liaj brutoj? 13 Jesuo
respondis kaj diris al ŝi: Ĉiu, kiu trinkas el ĉi tiu akvo,
denove soifos; 14 sed kiu trinkos el la akvo, kiun mi
donos al li, tiu neniam soifos; sed la akvo, kiun mi
donos al li, fariĝos en li fonto de akvo, ŝprucanta
supren por eterna vivo. **(aiōn g165, aiōnios g166)** 15 La
virino diris al li: Sinjoro, donu al mi ĉi tiun akvon, por
ke mi ne plu soifu, kaj ne devu traveni ĉi tien, por
ĉerpi. 16 Jesuo diris al ŝi: Foriru, voku vian edzon, kaj
revenu ĉi tien. 17 La virino respondis kaj diris al li: Mi
ne havas edzon. Jesuo diris al ŝi: Vi prave diris: Mi ne
havas edzon; 18 ĉar vi havis kvin edzojn; kaj tiu, kiun
vi nun havas, ne estas via edzo; ĉi tion vi diris vere. 19
La virino diris al li: Sinjoro, mi ekvidas, ke vi estas
profeto. 20 Niaj patroj adoradis sur ĉi tiu monto; kaj
vi diras, ke en Jerusalem estas la loko, kie oni devas
adori. 21 Jesuo diris al ŝi: Kredu al mi, virino; venas la
horo, kiam nek sur ĉi tiu monto, nek en Jerusalem, vi
adoros la Patron. 22 Vi adoras tion, kion vi ne konas;
ni adoras tion, kion ni konas; ĉar el la Judoj estas la
savo. 23 Sed venas la horo, kaj jam estas, kiam la veraj
adorantoj adoros la Patron laŭ spirito kaj vero; ĉar la
Patro serĉas tiajn por esti Liaj adorantoj. 24 Dio estas
Spirito: kaj Liaj adorantoj devas adori Lin laŭ spirito
kaj vero. 25 La virino diris al li: Mi scias, ke venas la
Mesio (kiu estas nomata Kristo); kiam tiu alestos, li
anoncos al ni ĉion. 26 Jesuo diris al ŝi: Tiu estas mi,
kiu parolas kun vi. 27 Kaj ĉe tio venis liaj disĉiploj, kaj
ili miris, ke li parolas kun virino; tamen neniu diris:
Kion vi volas? aŭ: Kial vi parolas kun ŝi? 28 La virino
do lasis sian akvokruĉon, kaj foriris en la urbon, kaj
diris al la homoj: 29 Venu, vidu homon, kiu rakontis al
mi ĉion, kion mi faris; ĉu eble ĉi tiu estas la Kristo? 30
Ili eliris el la urbo, kaj venis al li. 31 Dume la disĉiploj
petis lin, dirante: Rabeno, manĝu. 32 Sed li diris al ili:
Por manĝi mi havas nutraĵon, pri kiu vi ne scias. 33 La
disĉiploj do diris inter si: Ĉu iu alportis al li ion por
manĝi? 34 Jesuo diris al ili: Mia nutraĵo estas plenumi
la volon de Tiu, kiu min sendis, kaj fini Lian laboron.
35 Ĉu vi ne diras: Estas ankoraŭ kvar monatoj, kaj
venas la rikolto? jen mi diras al vi: Levu viajn okulojn
kaj rigardu la kampojn, ke ili jam estas blankaj por la
rikolto. 36 La rikoltanto ricevas salajron, kaj kolektas
frukton por eterna vivo, por ke ĝoju kune la semanto
kaj la rikoltanto. **(aiōnios g166)** 37 Ĉar en ĉi tio estas vera
la proverbo: Unu semas, alia rikoltas. 38 Mi vin sendis,
por rikolti tion, kion vi ne prilaboris; aliaj laboris, kaj
vi eniris en ilian laboron. 39 Kaj el tiu urbo multaj el
la Samarianoj kredis al li pro la diro de la virino, kiu

atestis: Li rakontis al mi ĉion, kion mi faris. 40 Kiam
do la Samarianoj venis al li, ili petis, ke li restu ĉe
ili; kaj li restis tie du tagojn. 41 Kaj multe pli multaj
kredis pro lia vorto, 42 kaj diris al la virino: Jam ne
pro via diro ni kredas, ĉar ni mem aŭdis lin; kaj ni
scias, ke ĉi tiu estas vere la Savanto de la mondo. 43
Kaj post la du tagoj li foriris de tie en Galileon. 44 Ĉar
Jesuo mem atestis, ke profeto ne havas honoron en
sia propra lando. 45 Kiam do li venis en Galileon, la
Galileanoj akceptis lin, ĉar ili jam vidis ĉion, kion li
faris en Jerusalem dum la festo; ĉar ili ankaŭ iris al la
festo. 46 Li revenis en Kanan Galilean, kie li faris la
akvon vino. Kaj estis unu kortegano, kies filo estis
malsana en Kapernaum. 47 Kiam li aŭdis, ke Jesuo
alvenis el Judujo en Galileon, li iris al li, kaj petis lin
malsupreniri kaj resanigi lian filon; ĉar li preskaŭ
mortis. 48 Jesuo do diris al li: Se vi ne vidas signojn
kaj mirindaĵojn, vi tute ne kredos. 49 La kortegano
diris al li: Sinjoro, malsupreniru, antaŭ ol mia fileto
mortos. 50 Jesuo diris al li: Foriru, via filo vivas. La
viro kredis la vorton, kiun Jesuo parolis al li, kaj li
foriris. 51 Dum li ankoraŭ malsupreniris, liaj sklavoj
lin renkontis, dirante: Via filo vivas. 52 Li demandis
al ili pri la horo, kiam li ekresaniĝis. Ili respondis al
li: Hieraŭ je la sepa horo la febro lin forlasis. 53 Tial
la patro sciis, ke tio estis en tiu sama horo, en kiu
Jesuo diris al li: Via filo vivas; kaj kredis li mem kaj lia
tuta domo. 54 Ĉi tiun jam la duan signon faris Jesuo,
veninte el Judujo en Galileon.

**5** Post tio estis festo de la Judoj, kaj Jesuo supreniris
al Jerusalem. 2 En Jerusalem apud la Pordego de
Ŝafoj estas lageto, nomata en la Hebrea lingvo Betesda,
havanta kvin portikojn. 3 En tiuj kuŝis amaso da
malsanuloj, blinduloj, lamuloj, velkintoj, kiuj atendis
la ekmovon de la akvo; 4 ĉar anĝelo de la Eternulo
malsupreniris iafoje en la lageton kaj movis la akvon;
kiu ajn do unua post la movado de la akvo enpaŝis,
tiu resaniĝis, tute egale, de kia malsano li suferis. 5
Kaj tie estis unu viro, kiu estis tridek ok jarojn en sia
malforteco. 6 Kiam Jesuo vidis lin kuŝantan, kaj sciis,
ke li jam de longe malsanas, li diris al li: Ĉu vi volas
fariĝi sana? 7 La malsanulo respondis: Sinjoro, mi
ne havas iun por enĵeti min en la lageton, kiam la
akvo moviĝis; sed dum mi venas, alia paŝas malsupren
antaŭ mi. 8 Jesuo diris al li: Leviĝu, prenu vian liton,
kaj iru. 9 Kaj la viro tuj fariĝis sana, kaj prenis sian
liton, kaj iris. Kaj estis la sabato en tiu tago. 10 La
Judoj do diris al la resanigito: Estas la sabato, kaj
al vi ne konvenas porti vian liton. 11 Li respondis:
Tiu, kiu min sanigis, diris al mi: Prenu vian liton,
kaj iru. 12 Ili demandis lin: Kiu estas tiu homo, kiu
diris al vi: Prenu kaj iru? 13 Sed la resanigito ne sciis,
kiu tiu estas; ĉar Jesuo jam formoviĝis pro la tiea
homamaso. 14 Poste Jesuo trovis lin en la templo, kaj
diris al li: Jen vi fariĝis sana; ne plu peku, por ke io pli
malbona ne okazu al vi. 15 La viro foriris, kaj diris
al la Judoj, ke Jesuo estas tiu, kiu lin sanigis. 16 Kaj
la Judoj persekutis Jesuon pro tio, ke li tion faris en
sabato. 17 Sed Jesuo respondis al ili: Mia Patro ĝis nun
laboras, kaj mi laboras. 18 Pro tio do la Judoj des pli
celis mortigi lin, pro tio, ke li ne nur malobservis la
sabaton, sed ankaŭ diris, ke Dio estas lia propra Patro,
kaj pretendis esti egala al Dio. 19 Jesuo do respondis
kaj diris al ili: Vere, vere, mi diras al vi: La Filo ne
povas per si mem fari ion, krom tio, kion li vidas la
Patron faranta; ĉar kion ajn Li faras, tion la Filo tiel
same ankaŭ faras. 20 Ĉar la Patro amas la Filon, kaj
montras al li ĉion, kion Li mem faras; kaj Li montros
al li farojn pli grandajn ol ĉi tio, por ke vi miru. 21
Ĉar kiel la Patro levas la mortintojn kaj ilin vivigas,
tiel ankaŭ la Filo vivigas tiujn, kiujn li volas. 22 Ĉar
la Patro juĝas neniun, sed Li donis ĉian juĝon al la
Filo, 23 por ke ĉiuj honoru la Filon tiel same, kiel ili
honoras la Patron. Kiu ne honoras la Filon, tiu ne
honoras la Patron, kiu lin sendis. 24 Vere, vere, mi
diras al vi: Kiu aŭskultas mian vorton, kaj kredas al
Tiu, kiu min sendis, tiu havas eternan vivon kaj ne
venas en juĝon, sed jam pasis de morto en vivon.
(aiōnios g166) 25 Vere, vere, mi diras al vi: Venas horo kaj
jam estas, kiam la mortintoj aŭdos la voĉon de la Filo
de Dio; kaj la aŭdintoj vivos. 26 Ĉar kiel la Patro havas
en Si mem vivon, tiel Li donis al la Filo ankaŭ, ke ĉi
tiu havu en si mem vivon; 27 kaj Li donis al li la rajton
fari juĝon, ĉar li estas la Filo de homo. 28 Ne miru pro
tio; ĉar venas horo, en kiu ĉiuj, kiuj estas en la tomboj,
aŭdos lian voĉon, 29 kaj eliros; la farintoj de bono,
al releviĝo por vivo; sed la farintoj de malbono, al
releviĝo por juĝo. 30 Mi ne povas per mi mem fari ion;
kiel mi aŭdas, tiel mi juĝas; kaj mia juĝo estas justa,
ĉar mi celas ne mian propran volon, sed la volon de
Tiu, kiu min sendis. 31 Se mi atestus pri mi mem, mia
atesto ne estus vera. 32 Estas alia, kiu atestas pri mi;
kaj mi scias, ke vera estas la atesto, kiun li atestas pri

mi. 33 Vi sendis al Johano, kaj li atestis pri la vero.
34 Sed la atesto, kiun mi ricevas, ne estas el homo,
tamen mi tion diras, por ke vi estu savitaj. 35 Li estis
la lampo, kiu brulas kaj lumas; kaj vi volis ĝoji kelkan
tempon en lia lumo. 36 Sed la atesto, kiun mi havas,
estas pli granda ol la atesto de Johano; ĉar la laboroj,
kiujn la Patro donis al mi por fini, tiuj samaj laboroj,
kiujn mi faras, atestas pri mi, ke la Patro min sendis.
37 Kaj la Patro, kiu min sendis, atestis pri mi. Vi nek
aŭdis iam Lian voĉon, nek vidis Lian formon. 38 Kaj vi
ne havas Lian vorton restantan en vi, ĉar vi ne kredas
al tiu, kiun Li sendis. 39 Vi esploras la Skribojn, ĉar vi
opinias, ke en ili vi havas eternan vivon; kaj ili estas
tio, kio atestas pri mi; (aiōnios g166) 40 kaj vi ne volas
veni al mi, por havi vivon. 41 De homoj mi ne prenas
gloron. 42 Sed mi vin scias, ke vi ne havas en vi la
amon al Dio. 43 Mi venis en la nomo de mia Patro, kaj
vi min ne akceptas; se alia venos en sia propra nomo,
vi lin akceptos. 44 Kiel povas kredi vi, kiuj prenas
gloron unu de alia, kaj la gloron, kiu venas de la sola
Dio, vi ne serĉas? 45 Ne pensu, ke mi akuzos vin antaŭ
la Patro; ekzistas unu, kiu akuzas vin, Moseo, al kiu vi
esperas. 46 Ĉar se vi kredus al Moseo, vi ankaŭ kredus
al mi, ĉar li skribis pri mi. 47 Sed se vi ne kredas liajn
skribojn, kiel vi kredos miajn vortojn?

6 Poste Jesuo foriris trans la maron de Galileo, tio
estas de Tiberias. 2 Kaj granda homamaso lin
sekvis, ĉar ili vidis la signojn, kiujn li faris por la
malsanuloj. 3 Kaj Jesuo supreniris sur la monton, kaj
tie li sidis kun siaj disĉiploj. 4 Kaj la Pasko, la festo
de la Judoj, estis proksima. 5 Jesuo do, levinte siajn
okulojn, kaj ekvidinte, ke granda homamaso venas
al li, diris al Filipo: De kie ni aĉetu panojn, por ke ĉi
tiuj manĝu? 6 Tion li diris, por provi lin; ĉar li mem
sciis, kion li faros. 7 Filipo respondis al li: Panoj por
ducent denaroj ne sufiĉus por ili, por ke ĉiu iometon
ricevu. 8 Unu el liaj disĉiploj, Andreo, frato de Simon
Petro, diris al li: 9 Ĉi tie estas knabo, kiu havas kvin
hordeajn panojn kaj du malgrandajn fiŝojn; sed kio
estas tio por tiom da homoj? 10 Jesuo diris: Sidigu
la homojn. Kaj estis tie multe da herbo. La viroj do
sidiĝis, nombre ĉirkaŭ kvin mil. 11 Kaj Jesuo prenis la
panojn, kaj doninte dankon, disdonis al la sidiĝintoj;
kaj tiel same el la fiŝoj tiom, kiom oni deziris. 12 Kaj
kiam ili satiĝis, li diris al siaj disĉiploj: Kolektu la
postrestantajn fragmentojn, por ke nenio perdiĝu. 13
Ili do kolektis ilin, kaj plenigis dek du korbojn per la
fragmentoj de la kvin hordeaj panoj, kiuj postrestis al
la manĝintoj. 14 Kiam do la homoj vidis la signon,
kiun Jesuo faris, ili diris: Ĉi tiu estas vere la profeto,
kiu devis veni en la mondon. 15 Tial Jesuo, eksciante,
ke oni celas veni kaj kapti lin, por fari lin reĝo, denove
fortiris sin sola al la monto. 16 Kaj kiam vesperiĝis, liaj
disĉiploj malsupreniris al la maro; 17 kaj enŝipiĝinte,
ili veturis trans la maron al Kapernaum. Kaj jam estis
mallume, kaj Jesuo ankoraŭ ne venis al ili. 18 Kaj
la maro malsereniĝis de forta vento, kiu blovis. 19
Kiam do ili remis proksimume dudek kvin ĝis tridek
stadiojn, ili ekvidis Jesuon iranta sur la akvo, kaj
proksimiĝanta al la ŝipo; kaj ili timis. 20 Sed li diris al
ili: Ĝi estas mi; ne timu. 21 Tiam ili volonte ricevis
lin en la ŝipon, kaj tuj la ŝipo albordiĝis tien, kien ili
veturis. 22 La sekvantan tagon, kiam la homamaso,
kiu restis trans la maro, vidis, ke nenia ŝipeto estas tie
krom unu, kaj ke Jesuo ne eniris kun la disĉiploj en la
ŝipon, sed la disĉiploj solaj veturis 23 (venis tamen
ŝipetoj el Tiberias proksime al la loko, kie oni manĝis
la panon, post kiam la Sinjoro donis dankon) — 24
kiam do la homamaso vidis, ke Jesuo ne estas tie, nek
liaj disĉiploj, ili ankaŭ eniris la ŝipetojn kaj veturis al
Kapernaum, serĉante Jesuon. 25 Kaj trovinte lin trans
la maro, ili diris al li: Rabeno, kiam vi venis ĉi tien? 26
Jesuo respondis al ili kaj diris: Vere, vere, mi diras
al vi: Vi min serĉas, ne ĉar vi vidis signojn, sed ĉar
vi manĝis el la panoj kaj satiĝis. 27 Laboru ne por la
pereema nutraĵo, sed por la nutraĵo, kiu restas ĝis
eterna vivo, kiun la Filo de homo donos al vi; ĉar lin
Dio, la Patro, sigelis. (aiōnios g166) 28 Ili do diris al li:
Kiel ni agu, por ke ni faru la farojn de Dio? 29 Jesuo
respondis kaj diris al ili: Jen la faro de Dio: kredi al
tiu, kiun Li sendis. 30 Ili do diris al li: Kian signon vi
montras, por ke ni vidu kaj kredu al vi? kion vi faras?
31 Niaj patroj manĝis la manaon en la dezerto, kiel
estas skribite: Li donis al ili ĉielan panon por manĝi.
32 Jesuo do diris al ili: Vere, vere, mi diras al vi: Ne
Moseo donis al vi tiun ĉielan panon; sed mia Patro
donas al vi la veran ĉielan panon. 33 Ĉar la pano de
Dio estas tiu, kiu malsupreniras de la ĉielo kaj donas
vivon al la mondo. 34 Ili do diris al li: Sinjoro, ĉiam
donu al ni tiun panon. 35 Jesuo diris al ili: Mi estas la
pano de vivo; kiu venas al mi, tiu neniam malsatos,
kaj kiu kredas al mi, tiu neniam soifos. 36 Sed mi diris
al vi, ke vi min vidis, kaj tamen vi ne kredas. 37 Ĉio,

kion la Patro donas al mi, venos al mi; kaj tiun, kiu
venas al mi, mi ja ne elĵetos. 38 Ĉar mi malsupreniris
de la ĉielo, por plenumi ne mian volon, sed la volon
de Tiu, kiu min sendis. 39 Kaj estas la volo de Tiu,
kiu min sendis, ke el ĉio, kion Li donis al mi, mi ne
perdu ion, sed relevu ĝin en la lasta tago. 40 Ĉar estas
la volo de mia Patro, ke ĉiu, kiu vidas la Filon kaj
kredas al li, havu eternan vivon; kaj mi levos tiun en
la lasta tago. (aiōnios g166) 41 La Judoj do murmuris pri
li, ĉar li diris: Mi estas la pano, kiu malsupreniris de la
ĉielo. 42 Kaj ili diris: Ĉu ĉi tiu ne estas Jesuo, filo de
Jozef, kies patron kaj patrinon ni konas? kiel do li
diras: Mi malsupreniris de la ĉielo? 43 Jesuo respondis
kaj diris al ili: Ne murmuru inter vi. 44 Neniu povas
veni al mi, se la Patro, kiu min sendis, ne tiros lin;
kaj mi levos tiun en la lasta tago. 45 Estas skribite en
la profetoj: Kaj ĉiuj estos instruitaj de Dio. Ĉiu do,
kiu aŭdis de la Patro kaj lernis, venas al mi. 46 Neniu
vidis la Patron, krom tiu, kiu estas de Dio; li vidis
la Patron. 47 Vere, vere, mi diras al vi: Kiu kredas,
tiu havas vivon eternan. (aiōnios g166) 48 Mi estas la
pano de vivo. 49 Viaj patroj manĝis la manaon en la
dezerto, kaj mortis. 50 Jen la pano, kiu malsupreniris
de la ĉielo, por ke oni manĝu el ĝi kaj ne mortu. 51
Mi estas la viva pano, kiu malsupreniris de la ĉielo;
se iu manĝos el ĉi tiu pano, tiu vivos eterne; kaj la
pano, kiun mi donos, estas mia karno, por la vivo de
la mondo. (aiōn g165) 52 La Judoj do disputis inter si,
dirante: Kiel ĉi tiu povas doni al ni sian karnon por
manĝi? 53 Jesuo do diris al ili: Vere, vere, mi diras al
vi: Se vi ne manĝas la karnon de la Filo de homo kaj
ne trinkas lian sangon, vi ne havas en vi vivon. 54
Kiu manĝas mian karnon kaj trinkas mian sangon,
tiu havas eternan vivon; kaj mi levos tiun en la lasta
tago. (aiōnios g166) 55 Ĉar mia karno estas vera manĝaĵo,
kaj mia sango estas vera trinkaĵo. 56 Kiu manĝas mian
karnon kaj trinkas mian sangon, tiu restas en mi, kaj
mi en li. 57 Kiel la vivanta Patro min sendis, kaj mi
vivas pro la Patro, tiel, kiu min manĝas, tiu vivos pro
mi. 58 Jen la pano, kiu malsupreniris de la ĉielo; ne
kiel la patroj manĝis, kaj mortis; kiu manĝas ĉi tiun
panon, tiu vivos eterne. (aiōn g165) 59 Tion li diris en la
sinagogo, instruante en Kapernaum. 60 Multaj do el
liaj disĉiploj, aŭdinte tion, diris: Malfacila estas tiu
parolo; kiu povas lin aŭskulti? 61 Sed Jesuo, sciante
en si mem, ke liaj disĉiploj pri tio murmuris, diris al
ili: Ĉu tio faligas vin? 62 Kio do, se vi vidos la Filon
de homo supreniranta tien, kie li antaŭe estis? 63 La
spirito estas la viviganto; la karno nenion utilas; la
vortoj, kiujn mi diris al vi, estas spirito kaj estas vivo.
64 Sed estas iuj el vi, kiuj ne kredas. Ĉar Jesuo sciis
de la komenco, kiuj estas la nekredantoj, kaj kiu lin
perfidos. 65 Kaj li diris: Tial mi diris al vi, ke neniu
povas veni al mi, se tio ne estas donita al li de mia
Patro. 66 Ĉe tio multaj el liaj disĉiploj iris returne kaj
lin ne plu akompanis. 67 Jesuo do diris al la dek du: Ĉu
vi ankaŭ volas foriri? 68 Simon Petro respondis al li:
Sinjoro, al kiu ni iru? vi havas la vortojn de eterna
vivo. (aiōnios g166) 69 Kaj ni ekkredis kaj scias, ke vi estas
la Sanktulo de Dio. 70 Respondis al ili Jesuo: Ĉu mi ne
elektis vin la dek du, kaj unu el vi estas diablo? 71 Li
parolis pri Judas Iskariota, filo de Simon; ĉar tiu, unu
el la dek du, estis perfidonta lin.

7 Kaj post tio Jesuo iradis en Galileo; ĉar li ne volis
iradi en Judujo, ĉar la Judoj celis mortigi lin.
2 La festo de la Judoj, nomata la festo de laŭboj,
proksimiĝis. 3 Liaj fratoj do diris al li: Transiru de
ĉi tie, kaj iru en Judujon, por ke viaj disĉiploj ankaŭ
vidu viajn farojn, kiujn vi faras. 4 Ĉar neniu faras ion
sekrete, kaj celas mem esti publike konata. Se vi faras
tiajn farojn, montru vin al la mondo. 5 Ĉar liaj fratoj
mem ne kredis al li. 6 Jesuo do diris al ili: Mia tempo
ankoraŭ ne venis; sed via tempo ĉiam estas preta. 7
La mondo ne povas vin malami; sed min ĝi malamas,
ĉar mi atestas pri ĝi, ke ĝiaj faroj estas malbonaj. 8
Supreniru vi al la festo; mi ankoraŭ ne supreniras al la
festo, ĉar mia tempo ankoraŭ ne maturiĝis. 9 Dirinte
tion al ili, li restis ankoraŭ en Galileo. 10 Sed kiam liaj
fratoj supreniris al la festo, tiam li ankaŭ supreniris,
ne malkaŝe, sed kvazaŭ sekrete. 11 La Judoj do serĉis
lin ĉe la festo, kaj diris: Kie li estas? 12 Kaj fariĝis
multe da murmurado inter la homamasoj pri li. Unuj
diris: Li estas bonulo; aliaj diris: Ne, sed li erarigas
la amason. 13 Tamen neniu parolis malkaŝe pri li,
pro timo antaŭ la Judoj. 14 Sed ĉirkaŭ la mezo de la
festo, Jesuo supreniris en la templon kaj instruis. 15
Kaj la Judoj miris, dirante: Kiel ĉi tiu scias skribojn,
neniam lerninte? 16 Jesuo respondis al ili kaj diris:
Mia instruado estas ne mia, sed Ties, kiu min sendis.
17 Se iu volas plenumi Lian volon, tiu scios pri la
instruado, ĉu ĝi estas de Dio, aŭ ĉu mi parolas nur
el mi mem. 18 Kiu parolas el si mem, tiu celas sian
propran gloron; sed kiu celas la gloron de Tiu, kiu lin

sendis, tiu estas verema, kaj maljusteco ne estas en li.
**19** Ĉu Moseo ne donis al vi la leĝon? kaj neniu el vi
observas la leĝon. Kial vi celas mortigi min? **20** La
homamaso respondis: Vi havas demonon; kiu celas
mortigi vin? **21** Jesuo respondis kaj diris al ili: Mi faris
unu faron, kaj vi ĉiuj miras pro tio. **22** Moseo donis al
vi cirkumcidon (tamen ĝi estas ne de Moseo, sed de la
patroj); kaj vi en la sabato cirkumcidas viron. **23** Se
viro estas cirkumcidata en la sabato, por ke oni ne
malobeu al la Mosea leĝo, ĉu vi koleras kontraŭ mi
pro tio, ke mi tute sanigis viron en sabato? **24** Ne juĝu
laŭ ŝajno, sed juĝu justan juĝon. **25** Tiam kelkaj el la
Jerusalemanoj diris: Ĉu li ne estas tiu, kiun oni celas
mortigi? **26** Kaj jen li parolas maltime, kaj ili diras al li
nenion. Ĉu eble la estraro certe scias, ke ĉi tiu estas
la Kristo? **27** Tamen ni scias, de kie ĉi tiu estas; sed
kiam la Kristo venos, neniu scios, de kie li estas. **28**
Jesuo do, instruante en la templo, ekkriis kaj diris: Vi
jam min konas, kaj vi ankaŭ scias, de kie mi estas;
kaj mi ne venis de mi mem; sed Tiu, kiu min sendis,
estas vera, sed Lin vi ne konas. **29** Mi Lin konas, ĉar mi
estas de Li; kaj Li min sendis. **30** Oni do celis kapti
lin; sed neniu metis sur lin sian manon, ĉar lia horo
ankoraŭ ne venis. **31** Kaj multaj el la homamaso kredis
al li, kaj diris: Kiam la Kristo venos, ĉu li faros pli
multe da signoj, ol ĉi tiu faris? **32** La Fariseoj aŭdis la
amason murmuranta tion pri li, kaj la ĉefpastroj kaj
la Fariseoj sendis oficistojn, por kapti lin. **33** Jesuo do
diris al ili: Ankoraŭ iom da tempo mi estas kun vi, kaj
mi foriras al Tiu, kiu min sendis. **34** Vi min serĉos kaj
ne trovos; kaj kie mi estas, vi ne povas tien veni. **35**
Tial la Judoj inter si diris: Kien ĉi tiu iros, ke ni lin
ne trovos? ĉu li iros al la disĵetitoj inter la Grekoj kaj
instruos la Grekojn? **36** Kia diro estas tio, kion li diris:
Vi min serĉos kaj ne trovos, kaj: Kie mi estas, vi ne
povas tien veni? **37** En la lasta tago, la granda tago de
la festo, Jesuo staris kaj kriis, dirante: Se iu soifas,
tiu venu al mi kaj trinku. **38** Kiu kredas al mi, kiel la
Skribo diris, el ties ventro fluos riveroj da viva akvo.
**39** Sed tion li diris pri la Spirito, kiun estis ricevontaj
tiuj, kiuj kredis al li; ĉar la Spirito ankoraŭ ne estis
donita, ĉar Jesuo ankoraŭ ne estis glorita. **40** Iuj do el
la homamaso, aŭdinte tiujn vortojn, diris: Vere ĉi tiu
estas la Profeto. **41** Aliaj diris: Ĉi tiu estas la Kristo.
Sed kelkaj diris: Tamen ĉu el Galileo la Kristo venas?
**42** Ĉu la Skribo ne diris, ke la Kristo venas el la idaro
de David kaj el la vilaĝo Bet-Leĥem, kie David estis?
**43** Tiel fariĝis pro li malkonsento inter la homamaso.
**44** Kaj iuj el ili volis kapti lin, sed neniu metis sur lin la
manojn. **45** Tiam la oficistoj revenis al la ĉefpastroj kaj
Fariseoj, kaj ĉi tiuj diris al ili: Kial vi lin ne alkondukis?
**46** Respondis la oficistoj: Ankoraŭ neniam tiel parolis
homo. **47** La Fariseoj do respondis al ili: Ĉu vi ankaŭ
estas erarigitaj? **48** Ĉu kredis al li iu el la regantoj, aŭ
el la Fariseoj? **49** Sed tiu homamaso, kiu ne scias la
leĝon, estas malbenita. **50** Tiam Nikodemo (tiu, kiu
venis nokte al Jesuo, estante unu el ili) diris al ili: **51**
Ĉu nia leĝo juĝas iun, se antaŭe oni ne aŭskultis lin,
kaj ne sciiĝis, kion li faras? **52** Ili respondis kaj diris al
li: Ĉu vi ankaŭ estas el Galileo? Esploru, kaj vidu, ke
neniam el Galileo venas profeto. **53** Kaj ĉiu iris al sia
domo;

**8** sed Jesuo iris al la monto Olivarba. **2** Kaj li revenis
frumatene en la templon, kaj la tuta popolo venis
al li; kaj li sidiĝis, kaj instruadis ilin. **3** Kaj la skribistoj
kaj Fariseoj alkondukis virinon, kaptitan en adulto; kaj
stariginte ŝin en la mezo, **4** ili diris al li: Majstro, ĉi tiu
virino estas kaptita adultante, en la faro mem. **5** En la
leĝo Moseo ordonis al ni tiajn ŝtonmortigi; sed kion vi
diras? **6** Kaj tion ili diris, provante lin, por povi lin
akuzi pri io. Sed Jesuo sin klinis, kaj per fingro skribis
sur la tero. **7** Kiam ili ankoraŭ demandis lin, li leviĝis,
kaj diris al ili: Kiu el vi estas senpeka, tiu unua ĵetu
sur ŝin ŝtonon. **8** Kaj denove li sin klinis kaj skribis
sur la tero. **9** Sed aŭdinte tion, ili eliris unu post alia,
komencante de la plej maljunaj kaj ĝis la lastaj; kaj
restis Jesuo sola, kaj la virino staranta en la mezo. **10**
Kaj Jesuo leviĝis, kaj diris al ŝi: Virino, kie ili estas? ĉu
neniu vin kondamnis? **11** Kaj ŝi diris: Neniu, Sinjoro.
Jesuo diris al ŝi: Ankaŭ mi vin ne kondamnas; iru, kaj
de nun ne plu peku.] **12** Jesuo denove parolis al ili,
dirante: Mi estas la lumo de la mondo; kiu min sekvas,
tiu ne iros en mallumo, sed havos la lumon de la vivo.
**13** La Fariseoj do diris al li: Vi atestas pri vi mem; via
atesto ne estas vera. **14** Jesuo respondis kaj diris al ili:
Kvankam mi atestas pri mi mem, tamen mia atesto
estas vera; ĉar mi scias, de kie mi venis, kaj kien mi
iras; sed vi ne scias, de kie mi venis, nek kien mi iras.
**15** Vi juĝas laŭ la karno; mi juĝas neniun. **16** Tamen, eĉ
se mi juĝas, mia juĝo estas vera; ĉar mi ne estas sola,
sed mi kaj la Patro, kiu min sendis. **17** Estas ja skribite
en via leĝo, ke la atesto de du homoj estas vera. **18**
Mi estas atestanto pri mi mem, kaj la Patro, kiu min

sendis, atestas pri mi. **19** Ili do diris al li: Kie estas via
Patro? Respondis Jesuo: Vi konas nek min, nek mian
Patron; se vi konus min, vi konus ankaŭ mian Patron.
**20** Tiujn vortojn Jesuo parolis en la trezorejo, dum
li instruis en la templo; kaj neniu arestis lin, ĉar lia
horo ankoraŭ ne venis. **21** Jesuo do denove diris al
ili: Mi foriras, kaj vi serĉos min, kaj vi mortos en via
peko; kien mi iras, tien vi ne povas veni. **22** La Judoj
do diris: Ĉu li sin mortigos? ĉar li diras: Kien mi iras,
tien vi ne povas veni. **23** Kaj li diris al ili: Vi estas de
malsupre, mi estas de supre; vi estas de ĉi tiu mondo,
mi ne estas de ĉi tiu mondo. **24** Mi tial diris al vi, ke
vi mortos en viaj pekoj; ĉar se vi ne kredos, ke mi
estas, vi mortos en viaj pekoj. **25** Ili do diris al li: Kiu
vi estas? Jesuo diris al ili: Laŭ tio, kion mi diradis al vi
de la komenco. **26** Mi havas multon por diri kaj juĝi
pri vi; sed Tiu, kiu min sendis, estas vera; kaj tion,
kion mi aŭdis de Li, mi parolas al la mondo. **27** Ili ne
komprenis, ke li parolas al ili pri la Patro. **28** Jesuo do
diris: Kiam vi levos la Filon de homo, tiam vi scios,
ke mi estas, kaj ke mi ne faras ion per mi mem; sed
kiel la Patro instruis min, tion mi parolas. **29** Kaj Tiu,
kiu min sendis, estas kun mi; Li ne lasis min sola; ĉar
mi ĉiam faras tion, kio plaĉas al Li. **30** Dum li parolis
tion, multaj kredis al li. **31** Jesuo do diris al la Judoj,
kiuj kredis al li: Se vi restos en mia vorto, vi estas
vere miaj disĉiploj; **32** kaj vi scios la veron, kaj la vero
vin liberigos. **33** Ili respondis al li: Ni estas idaro de
Abraham, kaj ankoraŭ al neniu ni estis sklavoj; kial vi
diras: Vi estos liberigitaj? **34** Jesuo respondis al ili:
Vere, vere, mi diras al vi: Ĉiu, kiu faras pekon, estas
sklavo de peko. **35** Kaj la sklavo ne ĉiam restas en la
domo, sed la filo ĉiam restas. **(aiōn g165)** **36** Se do la Filo
vin liberigos, vi estos efektive liberaj. **37** Mi scias, ke
vi estas idaro de Abraham; sed vi celas mortigi min,
ĉar mia vorto ne progresas en vi. **38** Mi parolas tion,
kion mi vidis ĉe mia Patro; kaj vi ankaŭ faras tion,
kion vi vidis ĉe via patro. **39** Ili respondis kaj diris al
li: Nia patro estas Abraham. Jesuo diris al ili: Se vi
estus Abrahamidoj, vi farus la farojn de Abraham. **40**
Sed nun vi celas mortigi min, homon, kiu parolis al vi
la veron, kiun mi aŭdis de Dio; tion Abraham ne faris.
**41** Vi faras la farojn de via patro. Tiam ili diris al li:
Ni ne naskiĝis per malĉasteco; unu Patron ni havas,
Dion. **42** Jesuo diris al ili: Se Dio estus via Patro, vi min
amus; ĉar de Dio mi elvenis, kaj estas veninta; ĉar mi
ne venis de mi mem, sed Li min sendis. **43** Kial vi ne
komprenas mian parolon? Tial, ke vi ne povas aŭdi
mian vorton. **44** Vi estas de patro, la diablo, kaj vi volas
fari la dezirojn de via patro. Li estis hommortiganto
de la komenco, kaj ne staras en la vero, ĉar vero ne
estas en li. Kiam li parolas mensogon, li parolas sian
propraĵon, ĉar li estas mensoganto, kaj la patro de
ĝi. **45** Sed tial, ke mi parolas la veron, vi ne kredas
al mi. **46** Kiu el vi pruvas kontraŭ mi pekon? Se mi
diras la veron, kial vi ne kredas al mi? **47** Kiu estas de
Dio, tiu aŭskultas la vortojn de Dio; vi ne aŭskultas,
ĉar vi ne estas el Dio. **48** La Judoj respondis kaj diris
al li: Ĉu ne prave ni diras, ke vi estas Samariano kaj
havas demonon? **49** Jesuo respondis: Mi ne havas
demonon; sed mi honoras mian Patron, kaj vi min
malhonoras. **50** Sed mi ne serĉas mian gloron: estas
Unu, kiu serĉas kaj juĝas. **51** Vere, vere, mi diras al vi:
Se iu observos mian vorton, tiu la morton neniam
vidos. **(aiōn g165)** **52** La Judoj diris al li: Nun ni scias, ke
vi havas demonon. Mortis Abraham, kaj la profetoj;
kaj vi diras: Se iu observos mian vorton, tiu la morton
neniam gustumos. **(aiōn g165)** **53** Ĉu vi estas pli granda ol
nia patro Abraham, kiu mortis? kaj la profetoj mortis;
kiu vi pretendas esti? **54** Jesuo respondis: Se mi gloros
min mem, mia gloro estas nenio; Tiu, kiu min gloras,
estas mia Patro, pri kiu vi diras, ke Li estas via Dio; **55**
kaj vi Lin ne konis, sed mi Lin konas; kaj se mi dirus,
ke mi Lin ne konas, mi estus, kiel vi, mensoganto;
sed mi Lin konas, kaj observas Lian vorton. **56** Via
patro Abraham ĝojegis vidi mian tagon, kaj li vidis kaj
estis ravita. **57** Tiam la Judoj diris al li: Vi ankoraŭ ne
estas kvindekjara, kaj ĉu vi vidis Abrahamon? **58** Jesuo
diris al ili: Vere, vere, mi diras al vi: Antaŭ ol naskiĝis
Abraham, mi ekzistas. **59** Tiam ili prenis ŝtonojn, por
ĵeti sur lin; sed Jesuo sin kaŝis, kaj eliris el la templo.

**9** Kaj preterirante, li vidis viron blindan de post la
naskiĝo. **2** Kaj liaj disĉiploj demandis lin, dirante:
Rabeno, kiu do pekis, ĉi tiu viro, aŭ liaj gepatroj, ke
li naskiĝis blinda? **3** Jesuo respondis: Nek ĉi tiu viro
pekis, nek liaj gepatroj; sed por ke la faroj de Dio
aperu en li. **4** Dum estas tago, mi devas prilabori la
farojn de Tiu, kiu min sendis; venas la nokto, kiam
neniu povas labori. **5** Dum mi estas en la mondo, mi
estas la lumo de la mondo. **6** Dirinte tion, li kraĉis sur
la teron, kaj faris el la kraĉaĵo koton, kaj ŝmiris per la
koto la okulojn de la blindulo, **7** kaj diris al li: Iru,
lavu vin en la lageto de Ŝiloaĥ (tio estas, Sendito).

Li do foriris, kaj sin lavis, kaj revenis vidanta. 8 La
najbaroj do, kaj tiuj, kiuj antaŭe vidis lin, ke li estas
almozulo, diris: Ĉu ĉi tiu ne estas tiu, kiu sidis kaj
petis almozojn? 9 Unuj diris: Li estas; aliaj diris: Ne,
sed li estas simila al tiu. Li diris: Tiu mi estas. 10 Ili
do diris al li: Kiamaniere viaj okuloj malfermiĝis? 11
Li respondis kaj diris: La homo, nomata Jesuo, faris
koton kaj ŝmiris miajn okulojn, kaj diris al mi: Iru al
Ŝiloaĥ, kaj vin lavu; kaj mi iris, kaj lavis min, kaj mi
ricevis vidpovon. 12 Tiam ili diris al li: Kie li estas?
Li diris: Mi ne scias. 13 Ili kondukis al la Fariseoj la
iam blindan viron. 14 Sed estis sabato la tago, en kiu
Jesuo faris la koton kaj malfermis liajn okulojn. 15
La Fariseoj do denove demandis lin, kiamaniere li
ricevis vidpovon. Kaj li diris al ili: Li metis koton sur
miajn okulojn, kaj mi lavis min, kaj mi vidas. 16 Unuj
do el la Fariseoj diris: Ĉi tiu homo ne estas de Dio,
ĉar li ne observas la sabaton. Aliaj diris: Kiel povas
homo pekulo fari tiajn signojn? Kaj malkonsento estis
inter ili. 17 Denove ili diris al la blindulo: Kion vi diras
pri li rilate tion, ke li malfermis viajn okulojn? Li
diris: Li estas profeto. 18 La Judoj ne kredis pri li, ke li
estis antaŭe blinda, kaj ke li ricevis vidpovon, ĝis ili
alvokis la gepatrojn de tiu, kiu ricevis vidpovon, 19
kaj demandis ilin, dirante: Ĉu ĉi tiu estas via filo, kiu,
vi diras, naskiĝis blinda? kiel do li nun vidas? 20 Liaj
gepatroj respondis kaj diris: Ni scias, ke ĉi tiu estas nia
filo, kaj ke li naskiĝis blinda; 21 sed kial li nun vidas,
ni ne scias; kaj kiu malfermis liajn okulojn, ni ne scias;
demandu lin, li havas plenaĝon; li pri si mem parolos.
22 Tion diris la gepatroj, ĉar ili timis la Judojn; ĉar la
Judoj jam interkonsentis, ke se iu konfesos, ke li estas
la Kristo, tiu estu forigita el la sinagogo. 23 Tial la
gepatroj diris: Li havas plenaĝon, demandu lin. 24 Ili
do denove alvokis la viron, kiu estis blinda, kaj diris
al li: Donu gloron al Dio; ni certe scias, ke tiu homo
estas pekulo. 25 Li do respondis: Ĉu li estas pekulo, mi
ne scias; unu aferon mi scias, ke mi estis blinda kaj
nun vidas. 26 Tiam ili diris al li denove: Kion li faris
al vi? kiamaniere li malfermis viajn okulojn? 27 Li
respondis al ili: Mi ĵus diris al vi, kaj vi ne atentis; kial
vi volas denove ĝin aŭdi? ĉu vi ankaŭ volas fariĝi liaj
disĉiploj? 28 Tiam ili insultis lin, kaj diris: Vi estas lia
disĉiplo, sed ni estas disĉiploj de Moseo. 29 Ni scias,
ke Dio parolis al Moseo; sed pri ĉi tiu, ni ne scias, de
kie li estas. 30 La viro respondis kaj diris al ili: Jen la
mirindaĵo, ke vi ne scias, de kie li estas, kaj tamen li
malfermis miajn okulojn. 31 Ni scias, ke Dio ne atentas
pekulojn; sed se iu estas adoranto de Dio kaj plenumas
Lian volon, tiun Li atentas. 32 De la komenco de la
mondo oni neniam aŭdis, ke iu malfermis la okulojn
de homo, kiu naskiĝis blinda. (aiōn g165) 33 Se ĉi tiu
homo ne estus de Dio, li nenion povus fari. 34 Ili
respondis kaj diris al li: Vi tute naskiĝis en pekoj, kaj
ĉu vi nin instruas? Kaj ili forpelis lin eksteren. 35 Jesuo
aŭdis, ke ili forpelis lin; kaj trovinte lin, li diris al li:
Ĉu vi kredas al la Filo de Dio? 36 Li respondis kaj diris:
Kiu li estas, Sinjoro, por ke mi kredu al li? 37 Jesuo
diris al li: Vi lin vidis; kaj li estas tiu, kiu parolas kun
vi. 38 Kaj li diris: Sinjoro, mi kredas. Kaj li adorkliniĝis
al li. 39 Kaj Jesuo diris: Por juĝo mi venis en ĉi tiun
mondon, por ke la nevidantoj vidu, kaj ke la vidantoj
fariĝu blindaj. 40 Kaj tion aŭdis tiuj el la Fariseoj, kiuj
estis kun li; kaj ili diris al li: Ĉu ni ankaŭ estas blindaj?
41 Jesuo diris al ili: Se vi estus blindaj, vi ne havus
pekon; sed nun vi diras: Ni vidas; via peko do restas.

**10** Vere, vere, mi diras al vi: Kiu eniras en la ŝafejon
ne tra la pordo, sed aliloke suprengrimpas, tiu
estas ŝtelisto kaj rabisto. 2 Sed kiu eniras tra la
pordo, tiu estas la paŝtisto de la ŝafoj. 3 Al tiu la
pordisto malfermas; kaj la ŝafoj aŭskultas lian voĉon,
kaj li alvokas laŭ nomoj siajn proprajn ŝafojn, kaj
elkondukas ilin. 4 Kaj kiam li kondukis eksteren siajn
ŝafojn, li iras antaŭ ili, kaj la ŝafoj lin sekvas, ĉar ili
konas lian voĉon. 5 Kaj fremdulon ili ne sekvos, sed
forkuros de li, ĉar ili ne konas la voĉon de fremduloj.
6 Tiun alegorion Jesuo diris al ili; sed ili ne komprenis,
kiajn aferojn li parolas al ili. 7 Jesuo do diris denove al
ili: Vere, vere, mi diras al vi: Mi estas la pordo de la
ŝafoj. 8 Ĉiuj, kiuj venis pli frue ol mi, estas ŝtelistoj
kaj rabistoj; sed la ŝafoj ne aŭskultis ilin. 9 Mi estas
la pordo; se iu tra mi eniras, tiu estos savita; kaj li
eniros kaj eliros, kaj trovos paŝtaĵon. 10 La ŝtelisto ne
venas, krom por ŝteli kaj buĉi kaj pereigi; mi venis,
por ke ili havu vivon, kaj havu ĝin abunde. 11 Mi
estas la bona paŝtisto; la bona paŝtisto demetas sian
vivon por la ŝafoj. 12 La dungito, kaj tiu, kiu ne estas
paŝtisto, kies propraĵo la ŝafoj ne estas, ekvidas la
lupon venanta kaj lasas la ŝafojn kaj forkuras; kaj la
lupo ilin kaptas kaj dispelas; 13 li forkuras tial, ke li
estas dungito kaj ne zorgas pri la ŝafoj. 14 Mi estas
la bona paŝtisto, kaj mi konas la miajn, kaj la miaj
min konas 15 tiel same, kiel la Patro min konas, kaj

mi konas la Patron; kaj mi demetas mian vivon por
la ŝafoj. 16 Kaj aliajn ŝafojn mi havas, kiuj ne estas
de ĉi tiu gregejo; ilin ankaŭ mi devas alkonduki, kaj
ili aŭskultos mian voĉon; kaj estos unu grego, unu
paŝtisto. 17 Pro tio la Patro min amas, ke mi demetas
mian vivon, por ke mi ĝin reprenu. 18 Neniu ĝin
forprenas de mi, sed mi ĝin demetas memvole. Mi
havas la rajton ĝin demeti, kaj mi havas la rajton ĝin
repreni. Ĉi tiun ordonon mi ricevis de mia Patro. 19
Denove fariĝis malkonsento inter la Judoj pro tiuj
diroj. 20 Kaj multaj el ili diris: Li havas demonon kaj
estas freneza; kial vi lin aŭskultas? 21 Aliaj diris: Tiuj
ne estas diroj de demonhavanto. Ĉu demono povas
malfermi la okulojn de blinduloj? 22 Okazis la festo de
inaŭguro en Jerusalem, kaj estis vintro; 23 kaj Jesuo
promenis en la templo, en la portiko de Salomono. 24
La Judoj do ĉirkaŭis lin, kaj diris al li: Ĝis kiam vi tenas
en dubo nian animon? Se vi estas la Kristo, diru al ni
malkaŝe. 25 Jesuo respondis al ili: Mi diris al vi, kaj vi
ne kredas; la faroj, kiujn mi faras en la nomo de mia
Patro, atestas pri mi. 26 Sed vi ne kredas, ĉar vi ne
estas el miaj ŝafoj. 27 Miaj ŝafoj aŭskultas mian voĉon,
kaj mi ilin konas, kaj ili min sekvas; 28 kaj mi donas
al ili eternan vivon; kaj ili neniam pereos, kaj neniu
ilin forkaptos el mia mano. **(aiōn g165, aiōnios g166)** 29 Mia
Patro, kiu donis ilin al mi, superas ĉion; kaj neniu
povas ion forkapti el la mano de mia Patro. 30 Mi kaj
la Patro estas unu. 31 Tiam la Judoj denove prenis
ŝtonojn, por ŝtonmortigi lin. 32 Jesuo respondis al ili:
Multajn bonajn farojn mi montris al vi de mia Patro;
pro kiu el ili vi volas ŝtonmortigi min? 33 La Judoj
respondis: Ne pro bona faro ni volas ŝtonmortigi vin,
sed pro blasfemo, kaj ĉar vi, estante homo, pretendas
esti Dio. 34 Jesuo respondis: Ĉu ne estas skribite en
via leĝo: Mi diris: Vi estas dioj? 35 Se li nomis dioj
tiujn, al kiuj venis la vorto de Dio (kaj la Skribo ne
povas esti nuligita), 36 ĉu vi diras pri tiu, kiun la Patro
konsekris kaj sendis en la mondon: Vi blasfemas; ĉar
mi diris: Mi estas Filo de Dio? 37 Se mi ne faras la
farojn de mia Patro, ne kredu al mi. 38 Sed se mi faras
ilin, kvankam vi ne kredas al mi, kredu la farojn, por
ke vi sciu kaj komprenu, ke la Patro estas en mi, kaj
mi en la Patro. 39 Ili denove celis kapti lin, sed li iris
for de ilia mano. 40 Li foriris denove trans Jordanon
tien, kie Johano unue baptis, kaj tie li restadis. 41 Kaj
multaj venis al li, kaj diris: Johano ja ne faris signon;
sed ĉio, kion Johano diris pri ĉi tiu, estis vera. 42 Kaj
tie multaj kredis al li.

**11** Kaj estis unu malsanulo, nomata Lazaro, el
Betania, la vilaĝo de Maria kaj ŝia fratino Marta.
2 Tiu Maria, kies frato Lazaro estis malsana, estis tiu
sama, kiu ŝmiris la Sinjoron per ŝmiraĵo kaj viŝis liajn
piedojn per siaj haroj. 3 La fratinoj do sendis al li,
dirante: Sinjoro, jen tiu, kiun vi amas, estas malsana.
4 Sed Jesuo, aŭdinte tion, diris: Ĉi tiu malsano estas ne
por la morto, sed por la gloro de Dio, por ke la Filo de
Dio estu per ĝi glorata. 5 Kaj Jesuo amis Martan kaj
ŝian fratinon kaj Lazaron. 6 Kaj kiam li sciiĝis, ke tiu
estas malsana, li restis ankoraŭ du tagojn en la loko,
kie li estis. 7 Poste li diris al la disĉiploj: Ni iru returne
en Judujon. 8 La disĉiploj diris al li: Rabeno, la Judoj
ĵus celis ŝtonmortigi vin; kaj ĉu vi denove iras tien? 9
Jesuo respondis: Ĉu ne estas dek du horoj en la tago?
Se iu iras dum la tago, li ne faletas, ĉar li vidas la
lumon de ĉi tiu mondo. 10 Sed se iu iras dum la nokto,
li faletas, ĉar en li ne estas la lumo. 11 Tion li parolis,
kaj poste li diris al ili: Nia amiko Lazaro endormiĝis,
sed mi iras, por veki lin el lia dormo. 12 La disĉiploj do
diris: Sinjoro, se li endormiĝis, li resaniĝos. 13 Jesuo
parolis pri lia morto; sed ili supozis, ke li parolas pri
ripozo en dormo. 14 Tiam Jesuo diris al ili klare: Lazaro
jam mortis. 15 Kaj pro vi mi ĝojas, ke mi ne ĉeestis tie,
por ke vi kredu; tamen ni iru al li. 16 Tiam Tomaso,
nomata Didimo, diris al siaj kundisĉiploj: Ni ankaŭ
iru, por ke ni mortu kun li. 17 Kiam Jesuo alvenis, li
trovis lin jam kvar tagojn entombigita. 18 Kaj Betania
estis proksime de Jerusalem, en la distanco de ĉirkaŭ
dek kvin stadioj; 19 kaj multaj el la Judoj jam venis
al Marta kaj Maria, por konsoli ilin pri ilia frato. 20
Marta do, kiam ŝi eksciis, ke Jesuo alproksimiĝas, iris
al li renkonte; sed Maria ankoraŭ sidis en la domo.
21 Tiam diris Marta al Jesuo: Sinjoro, se vi estus ĉi
tie, mia frato ne estus mortinta. 22 Sed eĉ nun mi
scias, ke kion ajn vi petos de Dio, tion Dio donos al
vi. 23 Jesuo diris al ŝi: Via frato releviĝos. 24 Marta
diris al li: Mi scias, ke li releviĝos ĉe la releviĝo en la
lasta tago. 25 Jesuo diris al ŝi: Mi estas la releviĝo kaj
la vivo; kiu kredas al mi, eĉ se li estos mortinta, tiu
vivos, 26 kaj ĉiu, kiu vivas kaj kredas al mi, por ĉiam
ne mortos. Ĉu vi tion kredas? **(aiōn g165)** 27 Ŝi diris al li:
Jes, Sinjoro, mi jam kredas, ke vi estas la Kristo, la Filo
de Dio, la venanta en la mondon. 28 Kaj dirinte tion, ŝi

foriris, kaj vokis sekrete sian fratinon Maria, dirante:
La Majstro ĉeestas, kaj vokas vin. 29 Kaj ŝi, aŭdinte
tion, leviĝis rapide kaj iris al li. 30 (Sed Jesuo ankoraŭ
ne eniris en la vilaĝon, sed estis en la loko, kie Marta
lin renkontis.) 31 La Judoj do, kiuj estis kun ŝi en la
domo kaj konsolis ŝin, vidinte, ke Maria leviĝis subite
kaj eliris, sekvis ŝin, dirante: Ŝi iras al la tombo, por
plori tie. 32 Kiam Maria alvenis al la loko, kie Jesuo
estis, kaj lin vidis, ŝi falis antaŭ liaj piedoj, dirante:
Sinjoro, se vi estus ĉi tie, mia frato ne estus mortinta.
33 Kiam do Jesuo vidis ŝin ploranta kaj la Judojn ankaŭ,
kiuj venis kun ŝi, plorantaj, li ĝemis en la spirito kaj
maltrankviliĝis, 34 kaj diris: Kie vi lin kuŝigis? Ili diris
al li: Sinjoro, venu kaj vidu. 35 Jesuo larmis. 36 La Judoj
do diris: Jen kiel li lin amis! 37 Sed kelkaj el ili diris:
Ĉu ĉi tiu, kiu malfermis la okulojn de la blindulo, ne
povus kaŭzi ankaŭ, ke ĉi tiu homo ne mortu? 38 Tiam
Jesuo, denove ĝemante en si, venis al la tombo. Ĝi
estis kaverno, kaj sur ĝi kuŝis ŝtono. 39 Jesuo diris:
Forprenu la ŝtonon. Marta, la fratino de la mortinto,
diris al li: Sinjoro, li jam malbonodoras, ĉar li estis
tie kvar tagojn. 40 Jesuo diris al ŝi: Ĉu mi ne diris al
vi, ke se vi kredos, vi vidos la gloron de Dio? 41 Oni
do forprenis la ŝtonon. Kaj Jesuo levis siajn okulojn,
kaj diris: Patro, mi dankas Vin, ke Vi min aŭskultis.
42 Kaj mi sciis, ke Vi ĉiam aŭskultas min; sed pro la
ĉirkaŭstaranta homamaso mi tion diris, por ke ili
kredu, ke Vi min sendis. 43 Kaj dirinte tion, li kriis per
laŭta voĉo: Lazaro, elvenu. 44 Kaj la mortinto elvenis,
kun la manoj kaj piedoj ligitaj per tombotukoj; kaj lia
vizaĝo estis ĉirkaŭligita per viŝtuko. Jesuo diris al ili:
Malligu lin, kaj lasu lin iri. 45 Tiam multaj el la Judoj,
kiuj venis al Maria, kaj vidis, kion li faris, kredis al li.
46 Sed kelkaj el ili foriris al la Fariseoj, kaj rakontis al
ili tion, kion Jesuo faris. 47 Tial la ĉefpastroj kaj la
Fariseoj kunvenigis sinedrion, kaj diris: Kion ni faras?
ĉar ĉi tiu homo faras multajn signojn; 48 se ni lasos lin
tiel, ĉiuj kredos al li, kaj la Romanoj venos kaj forigos
nian lokon kaj nian nacion. 49 Sed unu el ili, Kajafas,
ĉefpastro en tiu sama jaro, diris al ili: Vi scias nenion,
50 nek konsideras, ke bone estas por vi, ke unu homo
mortu por la popolo, kaj ke la tuta nacio ne pereu. 51
Sed li diris tion ne de si mem; sed estante ĉefpastro
en tiu jaro, li profetis, ke Jesuo mortos por la nacio; 52
kaj ne nur por la nacio, sed ankaŭ por ke li kunvenigu
en unu la ĉie disĵetitajn filojn de Dio. 53 De post tiu
tago do ili konsiliĝis, por lin mortigi. 54 Tial Jesuo ne
plu iris publike inter la Judoj, sed foriris de tie en la
kamparon apud la dezerto, en urbon nomatan Efraim;
kaj tie li restadis kun la disĉiploj. 55 Kaj la Pasko de la
Judoj proksimiĝis, kaj multaj supreniris el la kamparo
al Jerusalem antaŭ la Pasko, por sin sanktigi. 56 Ili
do serĉis Jesuon, kaj parolis inter si, starante en la
templo: Kion vi pensas? Ĉu ke li ne venos al la festo?
57 Kaj la ĉefpastroj kaj la Fariseoj jam antaŭe ordonis,
ke se iu scias, kie li estas, tiu montru tion, por ke oni
lin kaptu.

**12** Jesuo do ses tagojn antaŭ la Pasko venis al
Betania, kie estis Lazaro, kiun Jesuo relevis
el inter la mortintoj. 2 Oni do pretigis por li tie
vespermanĝon, kaj Marta servadis; sed Lazaro estis
unu el tiuj, kiuj sidis kun li ĉe manĝo. 3 Tiam Maria
prenis funton da pura narda ŝmiraĵo tre multekosta,
ŝmiris la piedojn de Jesuo, kaj viŝis liajn piedojn per
siaj haroj; kaj la domo pleniĝis de la odoro de la
ŝmiraĵo. 4 Sed diris Judas Iskariota, unu el liaj disĉiploj,
kiu estis lin perfidonta: 5 Kial oni ne vendis ĉi tiun
ŝmiraĵon por tricent denaroj kaj donis al malriĉuloj?
6 Tion li diris, ne ĉar li zorgis pri la malriĉuloj; sed ĉar
li estis ŝtelisto, kaj havis la monujon kaj forprenadis
tion, kion oni metis en ĝin. 7 Sed Jesuo diris: Lasu
ŝin konservi ĝin por la tago de mia entombigo. 8 Ĉar
la malriĉulojn vi ĉiam havas kun vi, sed min vi ne
ĉiam havas. 9 La amaso de la Judoj do sciiĝis, ke li
estas tie; kaj ili venis ne nur pro Jesuo, sed ankaŭ por
vidi Lazaron, kiun li levis el la mortintoj. 10 Sed la
ĉefpastroj konsiliĝis, ke ili mortigu ankaŭ Lazaron; 11
ĉar pro li multaj Judoj foriris, kaj kredis al Jesuo. 12
En la sekvanta tago granda homamaso, veninte al la
festo, kaj sciiĝinte, ke Jesuo venas al Jerusalem, 13
prenis branĉojn de la palmoj, kaj iris al li renkonte, kaj
kriis: Hosana! Estu benata la Reĝo de Izrael, kiu venas
en la nomo de la Eternulo! 14 Kaj Jesuo, trovinte junan
azenon, sidis sur ĝi, kiel estas skribite: 15 Ne timu,
filino de Cion: jen via Reĝo venas, sidanta sur ido de
azeno. 16 Tion la disĉiploj unue ne komprenis; sed post
la gloriĝo de Jesuo ili rememoris, ke tio estis skribita
pri li kaj ke oni faris al li tion. 17 La homamaso do, kiu
ĉeestis kun li, kiam li elvokis Lazaron el la tombo,
kaj levis lin el la mortintoj, atestis pri li. 18 Pro tio
ankaŭ la homamaso iris al li renkonte, ĉar ili sciiĝis,
ke li faris tiun signon. 19 La Fariseoj do diris inter si:
Vidu, kiel nenio prosperis al vi; jen la mondo eliris

post li. 20 Kaj inter tiuj, kiuj alvojaĝis por adorkliniĝi
ĉe la festo, estis iuj Grekoj; 21 tiuj do venis al Filipo,
kiu estis el Betsaida Galilea, kaj petis lin, dirante:
Sinjoro, ni volas vidi Jesuon. 22 Filipo venis kaj sciigis
Andreon; kaj poste Andreo kaj Filipo venis kaj sciigis
Jesuon. 23 Sed Jesuo respondis al ili, dirante: Venis la
horo, por ke la Filo de homo estu glorata. 24 Vere,
vere, mi diras al vi: Se la tritika grenero ne falas en la
teron kaj ne mortas, ĝi restas sola; sed se ĝi mortas, ĝi
donas multe da frukto. 25 Kiu amas sian vivon, tiu ĝin
perdas; kaj kiu malamas sian vivon en ĉi tiu mondo,
tiu ĝin konservos ĝis eterna vivo. (aiōnios g166) 26 Se iu
min servas, tiu sekvu min; kaj kie mi estas, tie ankaŭ
estos mia servanto; se iu min servas, tiun la Patro
honoros. 27 Nun maltrankviliĝas mia animo; kaj kion
mi diru? Patro, savu min el ĉi tiu horo. Sed por tio mi
venis ĝis ĉi tiu horo. 28 Patro, gloru Vian nomon. Tiam
voĉo venis el la ĉielo: Mi jam gloris ĝin kaj denove
gloros. 29 Do la apudstaranta homamaso, aŭdinte,
diris, ke tondris; aliaj diris: Anĝelo parolis al li. 30
Jesuo respondis kaj diris: Ne por mi venis tiu voĉo,
sed por vi. 31 Nun estas la juĝo de ĉi tiu mondo; nun
la estro de ĉi tiu mondo estos elpelita. 32 Kaj mi, se mi
estos suprenlevita de sur la tero, altiros al mi ĉiujn
homojn. 33 Tion li diris, per aludo montrante, per kia
morto li mortos. 34 La homamaso respondis al li: Ni
aŭdis el la leĝo, ke la Kristo restados por ĉiam; kaj kiel
vi diras: La Filo de homo devas esti suprenlevita? Kiu
estas ĉi tiu Filo de homo? (aiōn g165) 35 Jesuo do diris al
ili: Ankoraŭ mallongan tempon estas la lumo kun vi.
Iradu, dum vi havas la lumon, por ke la mallumo ne
venu sur vin; ĉar tiu, kiu iradas en mallumo, ne scias,
kien li iras. 36 Dum vi havas lumon, kredu al la lumo,
por ke vi fariĝu filoj de lumo. Tion parolis Jesuo, kaj li
foriris, kaj sin kaŝis for de ili. 37 Sed kvankam li jam
faris tiom da signoj antaŭ ili, tamen ili ne kredis al
li; 38 por ke plenumiĝu la vorto de la profeto Jesaja,
kiun li parolis: Ho Eternulo, kiu kredis nian raporton?
Kaj super kiu malkaŝiĝis la brako de la Eternulo? 39
Pro tio ili ne povis kredi, ĉar Jesaja diris plue: 40 Li
blindigis iliajn okulojn kaj sensentigis ilian koron, Por
ke ili ne vidu per siaj okuloj, kaj ke ili ne komprenu
per sia koro, Kaj ke ili ne konvertiĝu, Kaj ke Mi ilin ne
sanigu. 41 Tion diris Jesaja, ĉar li vidis lian gloron kaj
parolis pri li. 42 Tamen eĉ el la regantoj multaj kredis
al li; sed pro la Fariseoj ili ne konfesis lin, por ke ili ne
estu elpelitaj el la sinagogo; 43 ĉar ili ŝatis la laŭdon
de homoj pli, ol la gloron de Dio. 44 Kaj Jesuo kriis kaj
diris: Kiu kredas al mi, tiu kredas ne al mi, sed al Tiu,
kiu min sendis. 45 Kaj kiu vidas min, tiu vidas ankaŭ
Tiun, kiu min sendis. 46 Mi venis lumo en la mondon,
por ke ĉiu, kiu kredas al mi, ne restadu en mallumo.
47 Kaj se iu aŭdas miajn dirojn kaj ne plenumas ilin,
mi lin ne juĝas; ĉar mi venis, ne por juĝi la mondon,
sed por savi la mondon. 48 Tiu, kiu forrifuzas min kaj
ne akceptas miajn dirojn, havas juĝonton; la vorto,
kiun mi parolis, juĝos lin en la lasta tago. 49 Ĉar mi ne
parolis de mi mem; sed la Patro, kiu sendis min, mem
ordonis al mi, kion mi parolu, kaj kion mi diru. 50 Kaj
mi scias, ke Lia ordono estas eterna vivo; kion do mi
parolas, ĝuste kiel la Patro diris al mi, tiel mi parolas.
(aiōnios g166)

## 13

Kaj antaŭ la Paska festo Jesuo, sciante, ke lia
horo venis, por ke li transiru el ĉi tiu mondo al la
Patro, aminte siajn proprulojn, kiuj estis en la mondo,
amis ilin ĝis la fino. 2 Kaj dum la vespermanĝo, kiam
la diablo jam metis en la koron de Judas Iskariota, filo
de Simon, la intencon perfidi lin, 3 Jesuo, sciante, ke
la Patro donis ĉion en liajn manojn, kaj ke li venis
de Dio kaj iras al Dio, 4 leviĝis de la vespermanĝo
kaj demetis siajn vestojn; kaj li prenis viŝtukon, kaj
sin zonis. 5 Poste li verŝis akvon en la pelvon, kaj
komencis lavi la piedojn de la disĉiploj kaj viŝi ilin
per la tuko, per kiu li estis zonita. 6 Tiam li venis al
Simon Petro. Ĉi tiu diris al li: Sinjoro, ĉu vi lavas al mi
la piedojn? 7 Jesuo respondis kaj diris al li: Kion mi
faras, vi nun ne scias, sed poste vi komprenos. 8 Petro
diris al li: Vi ja neniam lavos miajn piedojn. Respondis
al li Jesuo: Se mi ne lavas vin, vi ne partoprenas kun
mi. (aiōn g165) 9 Simon Petro diris al li: Sinjoro, ne nur
miajn piedojn, sed ankaŭ la manojn kaj la kapon. 10
Jesuo diris al li: Kiu sin jam banis, tiu bezonas nur, ke
oni lavu la piedojn, kaj li estas tuta pura; kaj vi estas
puraj, tamen ne ĉiuj. 11 Ĉar li konis tiun, kiu perfidos
lin; tial li diris: Vi ne ĉiuj estas puraj. 12 Kiam do li
jam lavis iliajn piedojn kaj surmetis siajn vestojn kaj
denove sidiĝis, li diris al ili: Ĉu vi scias, kion mi faris
al vi? 13 Vi nomas min Majstro kaj Sinjoro; kaj prave
vi diras, ĉar tia mi estas. 14 Se do mi, la Sinjoro kaj la
Majstro, lavis viajn piedojn, vi ankaŭ devas inter vi
lavi la piedojn. 15 Ĉar mi donis al vi ekzemplon, por
ke vi ankaŭ faru tion, kion mi faris al vi. 16 Vere, vere,
mi diras al vi: Sklavo ne estas pli granda ol lia sinjoro;

nek estas la sendito pli granda ol la sendinto. 17 Se ĉi
tion vi scias, vi estas feliĉaj, se tion vi faras. 18 Ne pri
vi ĉiuj mi parolas; mi scias, kiujn mi elektis; sed por
ke plenumiĝu la Skribo: Tiu, kiu manĝas mian panon,
levis kontraŭ min la piedon. 19 De nun mi parolas al
vi pri tio, antaŭ ol ĝi okazos, por ke, kiam ĝi okazos,
vi kredu, ke mi estas. 20 Vere, vere, mi diras al vi: Kiu
akceptas tiun, kiun mi sendas, tiu akceptas min; kaj
kiu min akceptas, tiu akceptas Tiun, kiu min sendis.
21 Dirinte tion, Jesuo maltrankviliĝis en spirito, kaj
ateste parolis, dirante: Vere, vere, mi diras al vi, ke
unu el vi min perfidos. 22 Tiam la disĉiploj rigardis
unu la alian, dubante pri kiu li parolas. 23 Estis apud
la sino de Jesuo unu el liaj disĉiploj, kiun Jesuo amis.
24 Simon Petro do faris signon al li, ke li demandu,
pri kiu li parolas. 25 Tiu do, kliniĝante al la brusto
de Jesuo, diris al li: Sinjoro, kiu ĝi estas? 26 Jesuo
respondis: Ĝi estas tiu, por kiu mi trempos la pecon
kaj donos al li. Kaj trempinte la pecon, li donis ĝin
al Judas Iskariota, filo de Simon. 27 Kaj post la peco,
tiam Satano eniris en lin. Jesuo do diris al li: Kion
vi faras, tion faru senprokraste. 28 Sed neniu el la
kunmanĝantoj sciis, kial li diris al li tion. 29 Iuj pensis,
ĉar Judas havis la monujon, ke Jesuo diris al li: Aĉetu
tion, kion ni bezonas por la festo; aŭ ke li donu ion al
la malriĉuloj. 30 Li do, ricevinte la pecon, tuj eliris;
kaj estis nokto. 31 Kiam li eliris, Jesuo diris: Nun la
Filo de homo estas glorata, kaj Dio estas glorata en
li; 32 kaj Dio gloros lin en Si mem, kaj tuj Li gloros
lin. 33 Infanoj, ankoraŭ mallongan tempon mi estas
kun vi. Vi min serĉos; kaj kiel mi diris al la Judoj:
Kien mi iras, tien vi ne povas veni, tiel ankaŭ al vi mi
nun diras. 34 Novan ordonon mi donas al vi, ke vi
amu unu alian; kiel mi amis vin, tiel vi ankaŭ amu
unu alian. 35 Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj
disĉiploj, se vi havos amon unu al alia. 36 Simon Petro
diris al li: Sinjoro, kien vi iras? Jesuo respondis: Kien
mi iras, vi ne povas min sekvi nun, sed poste vi min
sekvos. 37 Petro diris al li: Sinjoro, kial mi ne povas
vin sekvi nun? mi demetos por vi mian vivon. 38 Jesuo
respondis al li: Ĉu vi demetos por mi vian vivon?
Vere, vere, mi diras al vi: La koko ne krios, antaŭ ol vi
min malkonfesos tri fojojn.

**14** Ne maltrankviliĝu via koro; vi kredas al Dio,
kredu ankaŭ al mi. 2 Ĉe la domo de mia Patro
estas multe da loĝejoj; se ne tiel estus, mi dirus al vi;
mi iras, por pretigi por vi lokon. 3 Kaj se mi iros kaj
pretigos por vi lokon, mi revenos kaj ricevos vin al mi
mem, por ke vi ankaŭ estu tie, kie mi estas. 4 Kaj kien
mi iras, vi scias, kaj vi konas la vojon. 5 Tomaso diris
al li: Sinjoro, ni ne scias, kien vi iras; kiel ni konas la
vojon? 6 Jesuo diris al li: Mi estas la vojo kaj la vero
kaj la vivo; neniu venas al la Patro krom per mi. 7 Se
vi min konus, vi konus ankaŭ mian Patron; kaj de nun
vi konas Lin kaj Lin vidis. 8 Filipo diris al li: Sinjoro,
montru al ni la Patron, kaj por ni tio sufiĉos. 9 Jesuo
diris al li: Ĉu mi estas kun vi tiel longan tempon, kaj
vi min ne konas, Filipo? tiu, kiu vidis min, vidis ankaŭ
la Patron; kiel vi diras: Montru al ni la Patron? 10 Ĉu
vi ne kredas, ke mi estas en la Patro kaj la Patro en
mi? la vortojn, kiujn mi parolas al vi, mi parolas ne
de mi mem; sed la Patro, restanta en mi, faras Siajn
farojn. 11 Kredu al mi, ke mi estas en la Patro, kaj
la Patro en mi; aŭ almenaŭ kredu al mi pro la faroj
mem. 12 Vere, vere, mi diras al vi: Kiu kredas al mi,
tiu ankaŭ faros la farojn, kiujn mi faras; kaj li faros pli
grandajn ol tiuj, ĉar mi iras al la Patro. 13 Kaj kion
ajn vi petos en mia nomo, tion mi faros, por ke la
Patro estu glorata en la Filo. 14 Se vi petos ion de mi
en mia nomo, tion mi faros. 15 Se vi min amas, vi
observos miajn ordonojn. 16 Kaj mi petos la Patron,
kaj Li donos al vi alian Parakleton, por ke li restadu
kun vi por ĉiam; (aiōn g165) 17 tiu estas la Spirito de la
vero, kiun la mondo ne povas akcepti, ĉar ĝi lin ne
vidas nek konas; vi lin konas, ĉar li restadas kun vi
kaj estos en vi. 18 Mi ne lasos vin orfaj; mi venas al
vi. 19 Ankoraŭ iom da tempo, kaj la mondo ne plu
vidos min, sed vi vidos min; ĉar mi vivas, tial vi ankaŭ
vivos. 20 En tiu tago vi scios, ke mi estas en mia Patro,
kaj vi en mi, kaj mi en vi. 21 Kiu havas miajn ordonojn
kaj observas ilin, tiu estas, kiu min amas; kaj kiu min
amas, tiu estos amata de mia Patro, kaj mi amos lin,
kaj elmontros min al li. 22 Judas (ne la Iskariota) diris
al li: Sinjoro, kio okazis, ke vi elmontros vin al ni, kaj
ne al la mondo? 23 Jesuo respondis kaj diris al li: Se iu
min amas, tiu observos mian vorton; kaj mia Patro lin
amos; kaj ni venos al li kaj faros loĝon kun li. 24 Kiu
min ne amas, tiu ne observas miajn vortojn; kaj la
vorto, kiun vi aŭdas, estas ne mia, sed de la Patro,
kiu min sendis. 25 Tion mi parolis al vi, dum mi ĉe vi
restas. 26 Sed la Parakleto, la Sankta Spirito, kiun la
Patro sendos en mia nomo, instruos vin pri ĉio, kaj
vin rememorigos pri ĉio, kion mi diris al vi. 27 Pacon

mi lasas al vi; mian pacon mi donas al vi; ne kiel la
mondo donas, mi donas al vi. Ne maltrankviliĝu via
koro, nek senkuraĝiĝu. 28 Vi aŭdis, ke mi diris al vi:
Mi foriras, kaj mi revenas al vi. Se vi min amus, vi
ĝojus pro tio, ke mi iras al la Patro, ĉar la Patro estas
pli granda ol mi. 29 Kaj nun mi diris al vi, antaŭ ol ĝi
okazos, por ke vi kredu, kiam ĝi okazos. 30 De nun
mi jam ne multe parolos kun vi; ĉar la estro de la
mondo venas; kaj li havas nenion en mi; 31 sed por ke
la mondo sciu, ke mi amas la Patron, kaj kiel la Patro
ordonis al mi, tiel mi faras. Leviĝu; ni foriru de ĉi tie.

**15** Mi estas la vera vinberarbo, kaj mia Patro estas
la kultivisto. 2 Ĉiun nefruktodonan branĉon en
mi Li forprenas; kaj ĉiun fruktodonan branĉon Li
purigas, por ke ĝi donu pli da frukto. 3 Jam vi estas
puraj pro la vorto, kiun mi parolis al vi. 4 Restadu en
mi, kaj mi en vi. Kiel la branĉo ne povas de si mem
doni frukton, se ĝi ne restas en la vinberarbo, tiel
ankaŭ vi ne povas, se vi ne restas en mi. 5 Mi estas la
vinberarbo; vi estas la branĉoj; kiu restadas en mi,
kaj mi en li, tiu donas multe da frukto; ĉar sen mi vi
nenion povas fari. 6 Se iu ne restas en mi, tiu estas
elĵetita, kiel la branĉo, kaj sekiĝas; kaj oni ilin kolektas
kaj ĵetas en fajron, kaj ili brulas. 7 Se vi restadas en
mi, kaj miaj vortoj restadas en vi, petu kion ajn vi
volos, kaj tio estos farita por vi. 8 En tio mia Patro
estas glorata, ke vi donas multe da frukto; kaj vi estos
miaj disĉiploj. 9 Kiel la Patro min amis, tiel mi ankaŭ
vin amis; restadu en mia amo. 10 Se vi observos miajn
ordonojn, vi restados en mia amo tiel same, kiel mi
observis la ordonojn de mia Patro kaj restadas en
Lia amo. 11 Tion mi parolis al vi, por ke mia ĝojo en
vi restadu, kaj via ĝojo estu plena. 12 Jen estas mia
ordono: ke vi amu unu alian tiel same, kiel mi vin
amis. 13 Neniu havas amon pli grandan ol tio, ke iu
demetus sian vivon por siaj amikoj. 14 Vi estas miaj
amikoj, se vi faras tion, kion mi al vi ordonas. 15 Mi
jam ne nomas vin sklavoj, ĉar la sklavo ne scias, kion
lia sinjoro faras; sed mi nomis vin amikoj, ĉar ĉion,
kion mi aŭdis de mia Patro, mi sciigis al vi. 16 Vi ne
elektis min, sed mi elektis vin, kaj starigis vin, por ke
vi iru kaj donu frukton, kaj ke via frukto daŭru; por
ke la Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi petos de Li en
mia nomo. 17 Tion mi ordonas al vi, por ke vi amu
unu la alian. 18 Se la mondo malamas vin, vi scias, ke
ĝi malamis min pli frue, ol vin. 19 Se vi estus el la
mondo, la mondo amus siajn proprajn; sed ĉar vi ne
estas el la mondo, kaj mi elektis vin for de la mondo,
tial la mondo vin malamas. 20 Memoru la vorton,
kiun mi diris al vi: Sklavo ne estas pli granda ol lia
sinjoro. Se ili min persekutis, vin ankaŭ ili persekutos;
se ili observis mian vorton, ankaŭ vian ili observos.
21 Sed ĉion ĉi tion ili faros al vi pro mia nomo, ĉar
ili ne konas Tiun, kiu min sendis. 22 Se mi ne estus
veninta kaj parolinta al ili, ili ne havus pekon; sed
nun ili ne havas pretekston por sia peko. 23 Tiu, kiu
min malamas, malamas ankaŭ mian Patron. 24 Se
mi ne estus farinta inter ili farojn, kiajn neniu alia
faris, ili ne havus pekon; sed nun ili vidis kaj malamis
min kaj ankaŭ mian Patron. 25 Sed tio okazas, por ke
plenumiĝu la vorto skribita en ilia leĝo: Ili malamis
min senkaŭze. 26 Sed kiam venos la Parakleto, kiun
mi sendos de la Patro al vi, la Spirito de la vero, kiu
devenas de la Patro, tiu pri mi atestos; 27 kaj vi ankaŭ
atestas, ĉar vi estis kun mi de la komenco.

**16** Tion mi parolis al vi, por ke vi ne falpuŝiĝu. 2
Ili forpelos vin el la sinagogoj; eĉ venas la horo,
kiam iu, kiu mortigos vin, opinios, ke li faras servon
al Dio. 3 Kaj tion ili faros pro tio, ke ili ne konis
la Patron, nek min. 4 Sed tion mi parolis al vi, por
ke vi rememoru, kiam ĝia tempo venos, ke mi ĝin
antaŭdiris al vi. Sed en la komenco mi ne diris al vi
tion, ĉar mi estis kun vi. 5 Sed nun mi foriras al Tiu,
kiu min sendis; kaj neniu el vi demandas min: Kien vi
iras? 6 Sed ĉar mi tiel parolis al vi, malĝojo plenigis
vian koron. 7 Tamen mi diras al vi la veron: Estas bone
por vi, ke mi foriros; ĉar se mi ne foriros, la Parakleto
ne venos al vi; sed se mi foriros, mi sendos lin al vi. 8
Kaj kiam li alvenos, li pruvos la mondon kulpa rilate
pekon kaj justecon kaj juĝon: 9 rilate pekon, ĉar ili
ne kredas al mi; 10 rilate justecon, ĉar mi foriras al
la Patro, kaj vi jam ne rigardas min; 11 rilate juĝon,
ĉar la estro de ĉi tiu mondo estas juĝita. 12 Mi havas
ankoraŭ multon por diri al vi, sed vi ne povas ĝin
nun elporti. 13 Tamen kiam venos li, la Spirito de la
vero, li gvidos vin en ĉian veron; ĉar li parolos ne de
si mem; sed kion ajn li aŭdos, tion li parolos; kaj li
anoncos al vi venontajn aferojn. 14 Li gloros min, ĉar
li ricevos el miaj kaj anoncos al vi. 15 Ĉio ajn, kion la
Patro havas, estas mia; tial mi diris, ke li ricevos el
miaj kaj anoncos al vi. 16 Mallongan tempon, kaj vi
jam ne rigardas min; kaj denove mallongan tempon,

kaj vi min vidos. 17 Iuj do el liaj disĉiploj diris al aliaj:
Kio estas ĉi tio, kion li diras al ni: Mallongan tempon,
kaj vi ne rigardas min; kaj denove mallongan tempon,
kaj vi min vidos; kaj: Ĉar mi foriras al la Patro? 18
Ili do diris: Kio estas ĉi tio, kion li diras: Mallongan
tempon? Ni ne komprenas lian diron. 19 Jesuo ekvidis,
ke ili deziras demandi lin, kaj li diris al ili: Ĉu vi serĉas
inter vi klarigon pri tio, kion mi diris: Mallongan
tempon, kaj vi ne rigardas min; kaj denove mallongan
tempon, kaj vi min vidos? 20 Vere, vere, mi diras al
vi, ke vi ploros kaj lamentos, sed la mondo ĝojos; vi
estos malĝojaj, sed via malĝojo fariĝos ĝojo. 21 Virino,
kiam ŝi akuŝas, havas malĝojon, ĉar ŝia horo venis; sed
kiam ŝi naskis la infaneton, ŝi jam ne memoras sian
doloregon, pro ĝojo, ĉar homo naskiĝis en la mondon.
22 Vi do ankaŭ havas nun malĝojon; sed mi revidos
vin, kaj via koro ĝojos, kaj neniu forprenos de vi vian
ĝojon. 23 Kaj en tiu tago vi demandos min pri nenio.
Vere, vere, mi diras al vi, se vi petos ion de la Patro,
Li donos ĝin al vi en mia nomo. 24 Ĝis nun vi petis
nenion en mia nomo; petu, kaj vi ricevos, por ke via
ĝojo estu plena. 25 Ĉi tion mi parolis al vi alegorie; sed
venas la horo, kiam mi jam ne parolos al vi alegorie,
sed anoncos al vi malkaŝe pri la Patro. 26 En tiu tago
vi petos en mia nomo; kaj mi ne diras, ke mi petos
de la Patro pro vi; 27 ĉar la Patro mem vin amas
tial, ke vi min amis, kaj kredis, ke mi elvenis de Dio.
28 Mi elvenis de la Patro, kaj alvenis en la mondon;
denove mi lasas la mondon, kaj iras al la Patro. 29 Liaj
disĉiploj diris: Jen nun vi parolas malkaŝe, kaj nenian
alegorion diras. 30 Nun ni scias, ke vi ĉion scias, kaj
ne bezonas, ke iu demandu vin; pro tio ni kredas, ke
vi elvenis de Dio. 31 Jesuo respondis al ili: Ĉu vi nun
kredas? 32 Jen venas la horo, kaj eĉ jam venis, kiam vi
disiĝos, ĉiu al sia loko, kaj vi lasos min sola; kaj tamen
mi ne estas sola, ĉar la Patro estas kun mi. 33 Tion mi
parolis al vi, por ke en mi vi havu pacon. En la mondo
vi havos suferadon; sed kuraĝu; mi venkis la mondon.

17 Tion Jesuo parolis; kaj levinte la okulojn al la
ĉielo, li diris: Patro, la horo venis; gloru Vian
Filon, por ke la Filo Vin gloru; 2 kiel Vi donis al li
aŭtoritaton super ĉiu karno, por ke li donu eternan
vivon al ĉiuj tiuj, kiujn Vi donis al li. (aiōnios g166) 3 Kaj
jen estas la eterna vivo, ke ili konu Vin, la sole veran
Dion, kaj tiun, kiun Vi sendis, Jesuon Kriston. (aiōnios
g166) 4 Mi gloris Vin sur la tero, plenuminte la faron,
kiun Vi donis al mi por fari. 5 Kaj nun, ho Patro, gloru
min kun Vi, per la gloro, kiun mi havis kun Vi, antaŭ
ol la mondo ekzistis. 6 Mi elmontris Vian nomon al la
homoj, kiujn Vi donis al mi el la mondo; Viaj ili estis,
kaj al mi Vi ilin donis; kaj ili konservis Vian vorton. 7
Nun ili scias, ke ĉio ajn, kion Vi donis al mi, estas de
Vi; 8 ĉar mi donis al ili la vortojn, kiujn Vi donis al
mi; kaj ili akceptis ilin, kaj scias vere, ke mi elvenis
de Vi; kaj ili kredas, ke Vi min sendis. 9 Mi preĝas
por ili; mi preĝas ne por la mondo, sed por tiuj, kiujn
Vi donis al mi, ĉar ili estas Viaj; 10 kaj ĉio mia estas
Via, kaj Via estas mia; kaj mi estas glorita per ili. 11
Mi jam ne estas en la mondo, kaj ĉi tiuj estas en la
mondo, kaj mi venas al Vi. Patro Sankta, gardu en
Via nomo tiujn, kiujn Vi donis al mi, por ke ili estu
unu tiel same, kiel ni. 12 Dum mi estis kun ili, mi
konservis en Via nomo tiujn, kiujn Vi donis al mi; kaj
mi gardis ilin, kaj neniu el ili pereis, krom la filo de
perdiĝo, por ke plenumiĝu la Skribo. 13 Sed nun mi
venas al Vi; kaj tion mi parolas en la mondo, por ke ili
havu mian ĝojon ĝis pleneco en si mem. 14 Mi donis
al ili Vian vorton; kaj la mondo malamis ilin, ĉar ili
ne estas el la mondo, kiel mi ne estas el la mondo.
15 Mi petas, ne ke Vi forigu ilin el la mondo, sed ke
Vi gardu ilin kontraŭ la malbono. 16 Ili ne estas el la
mondo, kiel mi ne estas el la mondo. 17 Konsekru ilin
en la vero; Via vorto estas vero. 18 Kiel Vi min sendis
en la mondon, tiel ankaŭ mi ilin sendis en la mondon.
19 Kaj por ili mi konsekras min, por ke ili mem ankaŭ
estu konsekritaj en la vero. 20 Kaj mi preĝas ne nur
por ili, sed ankaŭ por tiuj, kiuj kredos al mi pro ilia
vorto; 21 por ke ili ĉiuj estu unu; kiel Vi, Patro, estas
en mi, kaj mi en Vi, tiel ili ankaŭ estu en ni; por ke
la mondo kredu, ke Vi min sendis. 22 Kaj la gloron,
kiun Vi donis al mi, mi donis al ili; por ke ili estu
unu tiel same, kiel ni estas unu; 23 mi en ili, kaj Vi
en mi, por ke ili perfektiĝu en unu; por ke la mondo
sciu, ke Vi min sendis, kaj ke Vi ilin amis, kiel Vi min
amis. 24 Patro, pri tiuj, kiujn Vi donis al mi, mi volas,
ke ili ankaŭ estu kun mi tie, kie mi estas; por ke ili
vidu mian gloron, kiun Vi donis al mi; ĉar Vi amis
min antaŭ la fondo de la mondo. 25 Ho Patro justa, la
mondo Vin ne konis, tamen mi Vin konis; kaj ĉi tiuj
scias, ke Vi min sendis; 26 kaj al ili Vian nomon mi
konigis kaj ankoraŭ konigos, por ke la amo, per kiu Vi
amis min, estu en ili, kaj mi en ili.

**18** Parolinte tiujn vortojn, Jesuo foriris kun siaj
disĉiploj trans la torenton Kidron, kie estis
ĝardeno, en kiun li eniris kune kun siaj disĉiploj. 2
Kaj Judas, lia perfidanto, konis la lokon; ĉar Jesuo
ofte venis tien kun siaj disĉiploj. 3 Judas do, ricevinte
la kohorton kaj oficistojn, senditajn de la ĉefpastroj
kaj Fariseoj, venis tien kun lanternoj kaj torĉoj kaj
bataliloj. 4 Jesuo do, sciante ĉion, kio venos al li, paŝis
antaŭen, kaj diris al ili: Kiun vi serĉas? 5 Ili respondis
al li: Jesuon Nazaretan. Jesuo respondis: Mi estas tiu.
Kaj Judas, lia perfidanto, staris kun ili. 6 Kiam do li
diris al ili: Mi estas tiu, ili malantaŭen ekpaŝis kaj falis
sur la teron. 7 Tiam denove li demandis ilin: Kiun vi
serĉas? Ili diris: Jesuon Nazaretan. 8 Jesuo respondis:
Mi ĵus diris al vi, ke mi estas tiu; se do vi min serĉas,
lasu ĉi tiujn foriri; 9 por ke plenumiĝu la vorto, kiun li
diris: El tiuj, kiujn Vi donis al mi, mi perdis neniun. 10
Simon Petro do, havante glavon, eltiris ĝin, kaj frapis
sklavon de la ĉefpastro kaj detranĉis lian dekstran
orelon. La nomo de la sklavo estis Malĥo. 11 Jesuo
do diris al Petro: Metu la glavon en ĝian ingon; la
kalikon, kiun la Patro donis al mi, ĉu mi ne trinkos?
12 La kohorto kaj la milestro kaj la oficistoj de la
Judoj kaptis do Jesuon kaj ligis lin, 13 kaj kondukis
lin unue al Anas; ĉar ĉi tiu estis bopatro de Kajafas,
kiu estis ĉefpastro en tiu jaro. 14 Kajafas estis tiu,
kiu donis konsilon al la Judoj, ke estos bone, ke unu
homo mortu por la popolo. 15 Kaj Simon Petro sekvis
Jesuon, kaj ankaŭ alia disĉiplo. Ĉi tiu disĉiplo estis
konata de la ĉefpastro, kaj eniris kun Jesuo en la
korton de la ĉefpastro; 16 sed Petro staris ekstere
apud la pordo. Kaj la alia disĉiplo, kiu estis konata
de la ĉefpastro, eliris kaj parolis kun la pordistino,
kaj enirigis Petron. 17 La sklavino pordistino diris al
Petro: Ĉu vi ne estas ankaŭ el la disĉiploj de tiu homo?
Li diris: Mi ne estas. 18 La sklavoj kaj la oficistoj,
farinte karban fajron (ĉar estis malvarme), staris kaj
sin varmigis; Petro ankaŭ estis kun ili, starante kaj sin
varmigante. 19 La ĉefpastro demandis Jesuon pri liaj
disĉiploj kaj pri lia instruado. 20 Jesuo respondis al li:
Mi parolis malkaŝe al la mondo; mi ĉiam instruis en la
sinagogoj kaj en la templo, kie ĉiuj Judoj kunvenas; kaj
sekrete mi nenion parolis. 21 Kial vi min demandas?
demandu tiujn, kiuj aŭdis, kion mi parolis al ili; ili ja
scias, kion mi diris. 22 Kaj kiam li parolis tion, unu
el la apude starantaj oficistoj per la manplato frapis
Jesuon, dirante: Ĉu tiel vi respondas al la ĉefpastro?
23 Respondis Jesuo al li: Se mi malbone parolis, atestu
pri la malbono; sed se bone, kial vi min frapas? 24
Anas sendis lin ligitan al la ĉefpastro Kajafas. 25 Simon
Petro staris kaj sin varmigis. Oni do diris al li: Ĉu vi
estas unu el liaj disĉiploj? Li neis, dirante: Mi ne estas.
26 Unu el la sklavoj de la ĉefpastro, estante parenco de
tiu, kies orelon Petro detranĉis, diris: Ĉu mi ne vidis
vin kun li en la ĝardeno? 27 Petro do denove neis;
kaj tuj la koko ekkriis. 28 Kaj oni kondukis Jesuon
de Kajafas en la palacon; estis frumatene; kaj ili ne
eniris en la palacon, por ke ili ne malpuriĝu, sed povu
manĝi la Paskon. 29 Pilato do eliris al ili, kaj diris:
Kian akuzon vi prezentas kontraŭ ĉi tiu viro? 30 Ili
respondis kaj diris al li: Se li ne estus malbonfaranto,
ni ne transdonus lin al vi. 31 Pilato do diris al ili: Vi
mem prenu lin, kaj juĝu lin laŭ via leĝo. La Judoj
diris al li: Ne estas permesate al ni mortigi homon; 32
por ke plenumiĝu la vorto de Jesuo, kiun li parolis,
montrante, per kia morto li mortos. 33 Pilato do
reeniris en la palacon, kaj alvokis Jesuon, kaj diris al
li: Ĉu vi estas la Reĝo de la Judoj? 34 Jesuo respondis:
Ĉu vi tion diras de vi mem, aŭ ĉu aliaj diris ĝin al vi
pri mi? 35 Pilato respondis: Ĉu mi estas Judo? Via
propra nacio kaj la ĉefpastroj transdonis vin al mi;
kion vi faris? 36 Jesuo respondis: Mia regno ne estas
el ĉi tiu mondo; se mia regno estus el ĉi tiu mondo,
miaj servantoj bataladus, por ke mi ne transdoniĝu al
la Judoj; sed nun mia regno ne estas el ĉi tie. 37 Pilato
demandis lin: Ĉu vi do estas reĝo? Jesuo respondis: Vi
diras, ke mi estas reĝo. Por tio mi naskiĝis kaj venis
en la mondon, ke mi atestu pri la vero. Ĉiu, kiu estas
el la vero, aŭskultas mian voĉon. 38 Pilato diris al li:
Kio estas la vero? Kaj dirinte tion, li eliris denove al la
Judoj, kaj diris al ili: Mi trovas en li nenian kulpon. 39
Sed estas ĉe vi kutime, ke mi liberigu al vi unu dum la
Pasko: ĉu vi do volas, ke mi liberigu al vi la Reĝon de
la Judoj? 40 Kaj ili kriis denove, dirante: Ne ĉi tiun,
sed Barabason. Barabas estis rabisto.

**19** Tiam do Pilato prenis Jesuon kaj lin skurĝigis. 2
Kaj la soldatoj plektis kronon el dornoj kaj metis
ĝin sur lian kapon, kaj vestis lin per purpura mantelo;
3 kaj venis al li, kaj diris: Saluton, Reĝo de la Judoj!
kaj ili frapis lin per la manplatoj. 4 Pilato do denove
eliris, kaj diris al ili: Jen mi elkondukas lin al vi, por
ke vi sciu, ke mi trovas en li nenian kulpon. 5 Jesuo
do eliris, portante la dornan kronon kaj la purpuran

mantelon. Pilato diris al ili: Jen la homo! 6 Kiam do la
ĉefpastroj kaj oficistoj lin vidis, ili kriis: Krucumu,
krucumu lin. Pilato diris al ili: Mem prenu lin kaj
krucumu lin, ĉar mi trovas en li nenian kulpon. 7 La
Judoj respondis al li: Ni havas leĝon, kaj laŭ tiu leĝo
li devas morti tial, ke li pretendis esti Filo de Dio. 8
Kiam do Pilato aŭdis tiun diron, li des pli timis; 9 kaj
reenirinte en la palacon, li diris al Jesuo: De kie vi
estas? Sed Jesuo nenion respondis. 10 Tiam diris Pilato
al li: Ĉu vi ne parolas al mi? ĉu vi ne scias, ke mi havas
povon krucumi vin, kaj povon liberigi vin? 11 Jesuo
respondis: Vi havus nenian povon kontraŭ mi, se ĝi ne
estus donita al vi de supre; tial tiu, kiu transdonis min
al vi, havas la pli grandan pekon. 12 Ĉe tio Pilato penis
liberigi lin; sed la Judoj kriis, dirante: Se vi liberigos
tiun, vi ne estas amiko de Cezaro; ĉiu, kiu pretendas
esti reĝo, parolas kontraŭ Cezaro. 13 Kiam do Pilato
aŭdis tiun vorton, li elkondukis Jesuon, kaj sidiĝis
sur tribunala seĝo en loko nomata La Pavimo, sed
en la Hebrea lingvo Gabata. 14 Estis la Preparado de
la Pasko, ĉirkaŭ la sesa horo. Kaj li diris al la Judoj:
Jen via Reĝo! 15 Ili kriegis: Forigu, forigu, krucumu
lin. Pilato diris al ili: Ĉu mi krucumu vian Reĝon? La
ĉefpastroj respondis: Ni ne havas reĝon krom Cezaro.
16 Tiam do li transdonis lin al ili, por esti krucumita.
17 Kaj ili prenis Jesuon; kaj li eliris, portante sian
krucon, al la loko nomata Loko de Kranio, kiu estas en
la Hebrea lingvo Golgota; 18 tie ili krucumis lin, kaj
kun li du aliajn, ĉiuflanke po unu, kaj Jesuon meze.
19 Kaj Pilato ankaŭ skribis titolon, kaj surmetis ĝin
sur la krucon. Kaj estis skribite: JESUO NAZARETA,
LA REĜO DE LA JUDOJ. 20 Tiun titolon multaj el la
Judoj legis; ĉar la loko, kie Jesuo estis krucumita, estis
proksime de la urbo; kaj ĝi estis skribita Hebree kaj
Latine kaj Greke. 21 Tiam la ĉefpastroj de la Judoj diris
al Pilato: Ne skribu: La Reĝo de la Judoj; sed, ke li diris:
Mi estas Reĝo de la Judoj. 22 Respondis Pilato: Kion
mi skribis, tion mi skribis. 23 Kaj la soldatoj, kiam ili
krucumis Jesuon, prenis liajn vestojn, kaj dividis ilin
en kvar partojn, po unu parto por ĉiu soldato; kaj la
tunikon; sed la tuniko estis senkudra, desupre teksita
tra la tuto. 24 Ili do diris unu al alia: Ni ne disŝiru
ĝin, sed lotu pri ĝi, kies ĝi estos; por ke plenumiĝu
la Skribo, kiu diras: Ili dividis miajn vestojn inter
si, Pri mia tuniko ili lotis. Tion la soldatoj faris. 25
Sed apud la kruco de Jesuo staris lia patrino, kaj la
fratino de lia patrino, Maria, la edzino de Klopas, kaj
Maria Magdalena. 26 Jesuo, rigardante sian patrinon,
kaj la apudstarantan disĉiplon, kiun li amis, diris al
sia patrino: Virino, jen via filo! 27 Tiam li diris al
la disĉiplo: Jen via patrino! Kaj de post tiu horo la
disĉiplo akceptis ŝin en sian domon. 28 Jesuo, sciante,
ke ĉio jam finiĝis, por ke plenumiĝu la Skribo, diris:
Mi soifas. 29 Kuŝis tie vazo plena de vinagro; oni do
metis spongon, plenigitan per la vinagro, sur hisopon,
kaj levis ĝin al lia buŝo. 30 Kiam do Jesuo ricevis
la vinagron, li diris: Estas finite; kaj, klininte sian
kapon, li ellasis for la spiriton. 31 La Judoj, ĉar estis la
Preparado, por ke la korpoj ne restadu sur la krucoj
dum la sabato (ĉar la tago de tiu sabato estis granda
tago), petis Pilaton, ke oni rompu iliajn krurojn, kaj
forportu ilin. 32 Tiam la soldatoj venis, kaj rompis la
krurojn de la unua kaj de la alia krucumita kun li; 33
sed kiam ili venis al Jesuo, kaj vidis, ke li jam mortis,
ili ne rompis liajn krurojn; 34 tamen unu el la soldatoj
per lanco pikis lian flankon, kaj tuj elvenis sango kaj
akvo. 35 Kaj la vidinto atestis, kaj vera estas lia atesto;
kaj li scias, ke li diras la veron, ke vi ankaŭ kredu. 36
Ĉar tio okazis, por ke plenumiĝu la Skribo: Osto en li
ne estos rompita. 37 Kaj ankoraŭ alia Skribo diras: Ili
rigardos tiun, kiun ili trapikis. 38 Post tio, Jozef el
Arimateo, kiu estis disĉiplo de Jesuo, sed sekrete pro
timo antaŭ la Judoj, petis Pilaton, ke li povu forpreni
la korpon de Jesuo; kaj Pilato permesis. Li do venis kaj
forprenis lian korpon. 39 Venis ankaŭ Nikodemo (tiu,
kiu unue venis al Jesuo nokte), portanta miksaĵon de
mirho kaj aloo, ĉirkaŭ cent funtoj. 40 Ili do prenis la
korpon de Jesuo, kaj ĉirkaŭvindis ĝin per tolaĵoj kun
aromaĵoj, laŭ la kutimo de la Judoj por entombigo. 41
Kaj estis ĝardeno en la loko, kie li estis krucumita, kaj
en la ĝardeno nova tombo, en kiun ankoraŭ neniu
estis metita. 42 Tien do, pro la Preparado de la Judoj
(ĉar la tombo estis proksima) ili enmetis Jesuon.

**20** La unuan tagon de la semajno Maria Magdalena
venis frue, dum estis ankoraŭ mallume, al la
tombo, kaj vidis la ŝtonon prenita for de la tombo. 2 Ŝi
do kuris kaj venis al Simon Petro kaj al tiu alia disĉiplo,
kiun Jesuo amis, kaj ŝi diris al ili: Oni forprenis el
la tombo la Sinjoron, kaj ni ne scias, kien oni lin
metis. 3 Eliris do Petro kaj la alia disĉiplo, kaj iris
al la tombo. 4 Kaj ambaŭ ekkuris kune; kaj la alia
disĉiplo kuris antaŭen pli rapide ol Petro, kaj unua
alvenis al la tombo; 5 kaj kliniĝinte, li enrigardis, kaj

vidis la tolaĵojn kuŝantajn; tamen li ne eniris. 6 Kaj
poste venis Simon Petro, sekvante lin, kaj eniris en
la tombon; kaj li vidis la tolaĵojn kuŝantajn, 7 kaj la
viŝtukon, kiu estis sur lia kapo, ne kuŝantan kun la
tolaĵoj, sed kunvolvitan en aparta loko. 8 Tiam eniris
do la alia disĉiplo, kiu unua alvenis al la tombo, kaj
li vidis kaj kredis. 9 Ĉar ili ankoraŭ ne komprenis la
Skribon, ke li devas releviĝi el la mortintoj. 10 Kaj
la disĉiploj iris returne hejmen. 11 Sed Maria staris
ekstere apud la tombo, plorante; kaj dum ŝi ploris, ŝi
kliniĝis, kaj enrigardis en la tombon; 12 kaj ŝi vidis
du anĝelojn en blankaj vestoj, sidantajn, unu ĉe la
kaploko kaj unu ĉe la piedloko, kie la korpo de Jesuo
antaŭe kuŝis. 13 Kaj ili diris al ŝi: Virino, kial vi ploras?
Ŝi respondis: Ĉar oni forprenis mian Sinjoron, kaj
mi ne scias, kien oni lin metis. 14 Dirinte tion, ŝi sin
turnis malantaŭen, kaj vidis Jesuon staranta, kaj ne
sciis, ke ĝi estas Jesuo. 15 Jesuo diris al ŝi: Virino, kial
vi ploras? kiun vi serĉas? Ŝi, supozante, ke li estas
la ĝardenisto, diris al li: Sinjoro, se vi forportis lin,
sciigu min, kien vi metis lin, kaj mi lin forprenos.
16 Jesuo diris al ŝi: Maria. Ŝi sin turnis, kaj diris al
li Hebrelingve: Raboni; tio estas Majstro. 17 Jesuo
diris al ŝi: Ne tuŝu min; ĉar mi ankoraŭ ne supreniris
al la Patro; sed iru al miaj fratoj, kaj diru al ili: Mi
supreniras al mia Patro kaj via Patro, kaj al mia Dio
kaj via Dio. 18 Maria Magdalena venis al la disĉiploj,
sciigante: Mi vidis la Sinjoron; kaj ke li tion diris al ŝi.
19 Kiam do estis vespero en tiu sama tago, la unua de
la semajno, kaj kiam estis fermitaj la pordoj, kie la
disĉiploj estis, pro timo antaŭ la Judoj, Jesuo venis
kaj staris meze de ili, kaj diris al ili: Paco al vi. 20 Kaj
dirinte tion, li montris al ili siajn manojn kaj sian
flankon. La disĉiploj do ĝojis, vidante la Sinjoron. 21
Jesuo denove diris al ili: Paco al vi; kiel la Patro sendis
min, tiel ankaŭ mi vin sendas. 22 Kaj dirinte tion, li
elspiris sur ilin, kaj diris: Ricevu la Sanktan Spiriton:
23 kies pekojn vi pardonos, al tiuj ili estas pardonitaj;
kies vi retenos, ili estas retenitaj. 24 Sed Tomaso,
unu el la dek du, nomata Didimo, ne ĉeestis kun ili,
kiam Jesuo venis. 25 La aliaj disĉiploj do diris al li: Ni
vidis la Sinjoron. Sed li diris al ili: Se mi ne vidos en
liaj manoj la truon de la najloj, kaj se mi ne metos
mian fingron en la lokon de la najloj, kaj ne metos
mian manon en lian flankon, mi tute ne kredos. 26
Kaj post ok tagoj la disĉiploj denove estis interne, kaj
Tomaso kun ili. Kaj Jesuo venis, kiam la pordoj estis
fermitaj, kaj staris en la mezo, kaj diris: Paco al vi. 27
Tiam li diris al Tomaso: Etendu ĉi tien vian fingron
kaj vidu miajn manojn; kaj etendu vian manon kaj
enmetu ĝin en mian flankon; kaj ne estu nekredema,
sed estu kredanta. 28 Tomaso respondis al li kaj diris:
Mia Sinjoro kaj mia Dio. 29 Jesuo diris al li: Ĉar vi
vidis min, vi kredas; feliĉaj estas tiuj, kiuj ne vidis, kaj
tamen kredas. 30 Jesuo faris antaŭ la disĉiploj multajn
aliajn signojn, kiuj ne estas skribitaj en ĉi tiu libro; 31
sed ĉi tiuj estas skribitaj, por ke vi kredu, ke Jesuo
estas la Kristo, la Filo de Dio, kaj ke kredante, vi havu
vivon en lia nomo.

**21** Post tio Jesuo denove sin montris al la disĉiploj
apud la maro de Tiberias; kaj li montris sin jene.
2 Estis kune Simon Petro, kaj Tomaso, nomata Didimo,
kaj Natanael el Kana Galilea, kaj la filoj de Zebedeo,
kaj aliaj du el liaj disĉiploj. 3 Simon Petro diris al ili:
Mi iras, por fiŝkapti. Ili diris al li: Ni ankaŭ iras kun
vi. Ili do eliris, kaj iris sur la ŝipon; kaj tiun nokton
ili nenion kaptis. 4 Sed ĉe la tagiĝo Jesuo staris sur
la marbordo; tamen la disĉiploj ne sciis, ke ĝi estas
Jesuo. 5 Tiam Jesuo diris al ili: Infanoj, ĉu vi havas
ian manĝaĵon? Ili respondis al li: Ne. 6 Kaj li diris al
ili: Ĵetu la reton ĉe la dekstra flanko de la ŝipo, kaj
vi trovos. Ili do ĝin elĵetis; kaj pro la multeco de la
fiŝoj ili ne plu povis ĝin treni. 7 Tiu disĉiplo, kiun
Jesuo amis, diris al Petro: Ĝi estas la Sinjoro. Kiam do
Simon Petro aŭdis, ke ĝi estas la Sinjoro, li alzonis
al si sian kitelon (ĉar li estis nuda) kaj ĵetis sin en la
maron. 8 Sed la aliaj disĉiploj venis en la ŝipeto (ĉar
ili estis ne malproksime de la tero, sed nur ĉirkaŭ
ducent ulnoj), trenante la reton plenan de fiŝoj. 9
Kaj kiam ili eliris sur la teron, ili vidis fajron karban
aranĝitan tie, kaj fiŝon kuŝantan sur ĝi, kaj panon. 10
Jesuo diris al ili: Alportu el la fiŝoj, kiujn vi ĵus kaptis.
11 Simon Petro iris sur la ŝipon, kaj tiris la reton al
la tero, plenan de grandaj fiŝoj, cent kvindek tri; kaj
kvankam estis tiel multaj, tamen la reto ne disŝiriĝis.
12 Jesuo diris al ili: Venu, matenmanĝu. Kaj neniu el la
disĉiploj kuraĝis lin demandi: Kiu vi estas? sciante, ke
ĝi estas la Sinjoro. 13 Jesuo venis kaj prenis la panon
kaj donis al ili, kaj tiel same la fiŝon. 14 Tiu estas jam
la tria fojo, kiam aperis Jesuo al siaj disĉiploj, post sia
releviĝo el la mortintoj. 15 Post la matenmanĝo Jesuo
diris al Simon Petro: Simon, filo de Jona, ĉu vi amas
min pli, ol tiuj? Li diris al li: Jes, Sinjoro; vi scias, ke

mi vin amas. Li diris al li: Paŝtu miajn ŝafidojn. **16** Li
diris al li ankoraŭ la duan fojon: Simon, filo de Jona,
ĉu vi min amas? Li diris al li: Jes, Sinjoro; vi scias, ke
mi vin amas. Li diris al li: Zorgu pri miaj ŝafoj. **17**
Li diris al li la trian fojon: Simon, filo de Jona, ĉu vi
min amas? Petro ĉagreniĝis, ke li diris al li la trian
fojon: Ĉu vi min amas? kaj respondis al li: Sinjoro,
vi scias ĉion; vi scias, ke mi vin amas. Jesuo diris al
li: Paŝtu miajn ŝafojn. **18** Vere, vere, mi diras al vi:
Kiam vi estis juna, vi zonis vin, kaj iris, kien vi volis;
sed kiam vi maljuniĝos, vi etendos viajn manojn, kaj
alia vin zonos, kaj portos vin, kien vi ne volos. **19**
Tion li diris, montrante per aludo, per kia morto li
gloros Dion. Kaj dirinte tion, li diris al li: Sekvu min.
**20** Petro, sin turninte, vidis malantaŭe la disĉiplon,
kiun Jesuo amis (kiu ankaŭ klinis sin al lia brusto
dum la vespermanĝo, kun la diro: Sinjoro, kiu estas
la perfidanta vin?). **21** Petro do, vidinte lin, diris al
Jesuo: Sinjoro, kaj kion pri ĉi tiu? **22** Jesuo diris al li:
Se mi volas, ke li restu, ĝis mi venos, kio estas al vi? vi
sekvu min. **23** Tial inter la fratoj disiris la famo, ke tiu
disĉiplo ne mortos; tamen Jesuo ne diris al li, ke li ne
mortos, sed: Se mi volas, ke li restu, ĝis mi venos, kio
estas al vi? **24** Tiu estas la disĉiplo, kiu atestas pri tio
kaj skribis tion: kaj ni scias, ke lia atesto estas vera. **25**
Estas ankaŭ multaj aliaj faroj, kiujn Jesuo faris; kaj mi
supozas, ke se ĉiu el ili estus skribita detale, la tuta
mondo ne havus lokon por la skribotaj libroj.

# Agoj

1 La unuan historion mi faris, ho Teofilo, pri ĉio,
kion Jesuo komencis fari kaj instrui, 2 ĝis la tago,
kiam li estis akceptita supren, doninte ordonon per
la Sankta Spirito al la apostoloj, kiujn li elektis; 3 al
kiuj ankaŭ post sia suferado li montris sin vivanta
per multaj pruvoj, dum kvardek tagoj aperante al ili
kaj parolante pri la aferoj de la regno de Dio; 4 kaj
kunestante, li admonis ilin ne foriri el Jerusalem, sed
atendi tiun promeson de la Patro, pri kiu (li diris)
vi aŭdis de mi; 5 ĉar kiel Johano baptis per akvo,
vi baptiĝos per la Sankta Spirito post ne multe da
tagoj. 6 Ili do, kunveninte, demandis lin, dirante:
Sinjoro, ĉu en ĉi tiu tempo vi restarigas la regadon
al Izrael? 7 Kaj li diris al ili: Ne apartenas al vi scii
tempojn aŭ epokojn, kiujn la Patro rezervis en Sia
aŭtoritato. 8 Sed vi ricevos povon, kiam la Sankta
Spirito venos sur vin; kaj vi estos miaj atestantoj
en Jerusalem kaj en la tuta Judujo kaj Samario kaj
ĝis la plej malproksima parto de la tero. 9 Kaj tion
dirinte, li suprenleviĝis, ankoraŭ dum ili rigardis,
kaj nubo ricevis lin for de iliaj okuloj. 10 Kaj dum
ili fikse rigardis al la ĉielo, kiam li foriris, jen staris
apud ili du viroj blanke vestitaj; 11 kiuj ankaŭ diris:
Viroj Galileanoj, kial vi staras rigardantaj al la ĉielo?
ĉi tiu Jesuo, kiu estas prenita supren for de vi en
la ĉielon, tiel same revenos, kiel vi vidis lin iranta
en la ĉielon. 12 Tiam ili iris returne al Jerusalem de
la monteto nomata Olivarba, kiu estas proksime de
Jerusalem, en la distanco de sabata vojaĝo. 13 Kaj
kiam ili envenis, ili supreniris en la supran ĉambron,
kie loĝis Petro kaj Johano kaj Jakobo kaj Andreo,
Filipo kaj Tomaso, Bartolomeo kaj Mateo, Jakobo, filo
de Alfeo, kaj Simon, la Fervorulo, kaj Judas, filo de
Jakobo. 14 Ĉiuj ĉi tiuj unuanime persistis en preĝado
kaj petado, kun la virinoj, kaj Maria, la patrino de
Jesuo, kaj kun liaj fratoj. 15 Kaj en tiuj tagoj Petro,
stariĝinte meze de la fratoj, diris (kaj multego da
personoj estis kune, ĉirkaŭ cent dudek): 16 Fratoj,
estis necese, ke plenumiĝu tiu Skribo, kiun la Sankta
Spirito antaŭparolis per la buŝo de David pri Judas,
kiu fariĝis gvidanto al tiuj, kiuj kaptis Jesuon. 17 Ĉar li
estis kalkulita inter ni kaj ricevis sian parton en ĉi tiu
servado. 18 (Tiu ja akiris kampon per la rekompenco
de sia maljusteco, kaj falinte kapantaŭe, li diskrevis
meze, kaj ĉiuj liaj internaĵoj elŝutiĝis. 19 Kaj tio fariĝis
sciata al ĉiuj loĝantoj en Jerusalem, tiel ke en ilia
dialekto tiu kampo estas nomita Akeldama, tio estas,
Kampo de Sango.) 20 Ĉar estas skribite en la Psalmaro:
Lia loĝejo dezertiĝu, Kaj en ĝi ne ekzistu loĝanto; kaj:
Lian oficon ricevu alia. 21 El tiuj viroj do, kiuj nin
akompanis dum la tuta tempo, en kiu la Sinjoro Jesuo
eniris kaj eliris inter ni, 22 komencante de la bapto de
Johano ĝis la tago, kiam li estis akceptita supren for
de ni, unu devas esti atestanto kun ni pri lia releviĝo.
23 Kaj ili starigis du: Jozefon, nomatan Barsabas, kies
alnomo estis Justo, kaj Mattiason. 24 Kaj preĝante,
ili diris: Vi, ho Sinjoro, kiu konas la korojn de ĉiuj,
elmontru, kiun el ĉi tiuj du Vi elektis, 25 por ricevi la
parton en ĉi tiu servado kaj apostoleco, de kiu Judas
forfalis, por iri al sia propra loko. 26 Kaj ili lotis pri
tio, kaj la loto falis por Mattias; kaj li estis alkalkulita
al la dek unu apostoloj.

2 Kaj kiam venis la Pentekosta tago, ili ĉiuj estis
unuanime en unu loko. 2 Kaj subite venis el la ĉielo
sono kvazaŭ blovego de forta vento, kaj ĝi plenigis la
tutan domon, kie ili sidis. 3 Kaj al ili aperis disirantaj
langoj kvazaŭ el fajro, kaj sidiĝis sur ĉiun el ili. 4 Kaj
ĉiuj pleniĝis de la Sankta Spirito, kaj komencis paroli
aliajn lingvojn, kiel la Spirito donis al ili parolpovon.
5 Kaj en Jerusalem tiam loĝis piaj Judoj el ĉiu nacio
sub la ĉielo. 6 Kaj kiam aŭdiĝis tiu sono, la homamaso
kunvenis kaj miregis, ĉar ĉiu aparte aŭdis ilin paroli
per lia propra dialekto. 7 Kaj ĉiuj konfuziĝis kaj miris,
dirante unu al alia: Rigardu! ĉu ne estas Galileanoj ĉiuj
tiuj parolantoj? 8 Kiel do ni aŭdas ĉiu en sia dialekto,
en kiu ni naskiĝis? 9 Partoj kaj Medoj kaj Elamanoj, kaj
loĝantoj en Mezopotamio, Judujo, Kapadokio, Ponto
kaj Azio, 10 Frigio kaj Pamfilio, Egiptujo kaj la partoj
de Libio apud Kireno, kaj pasloĝantaj Romanoj, Judoj
kaj prozelitoj, 11 Kretanoj kaj Araboj — ni aŭdas ilin
paroli en niaj lingvoj la mirindaĵojn de Dio. 12 Kaj ĉiuj
konfuziĝis kaj embarasiĝis, dirante unu al alia: Kion ĉi
tio signifas? 13 Sed aliaj moke diris: Ili estas plenaj
de mosto. 14 Sed Petro, stariĝinte kun la dek unu,
levis sian voĉon kaj parolis al ili, dirante: Ho Judoj kaj
ĉiuj loĝantaj en Jerusalem, ĉi tio estu al vi sciata, kaj
aŭskultu miajn vortojn. 15 Ĉar ĉi tiuj ne estas ebriaj,
kiel vi supozas, ĉar estas la tria horo de la tago; 16 sed
jen tio, kio estis dirita per la profeto Joel: 17 Kaj en
la lasta tempo, diras Dio, Mi elverŝos Mian spiriton
sur ĉiun karnon; Kaj viaj filoj kaj viaj filinoj profetos,

Kaj viaj junuloj havos viziojn, Kaj viaj maljunuloj
havos sonĝojn; 18 Kaj eĉ sur Miajn sklavojn kaj Miajn
sklavinojn en tiu tempo Mi elverŝos Mian spiriton,
Kaj ili profetos. 19 Kaj Mi donos miraklojn en la ĉielo
supre, Kaj signojn sur la tero malsupre: Sangon, fajron,
kaj vaporon de fumo; 20 La suno fariĝos malluma, Kaj
la luno fariĝos sanga, Antaŭ ol venos la granda kaj
majesta tago de la Eternulo; 21 Kaj ĉiu, kiu vokos la
nomon de la Eternulo, saviĝos. 22 Izraelidoj, aŭskultu
la jenajn vortojn: Jesuon, la Nazaretanon, viron de
Dio, elmontritan al vi per potencaĵoj kaj mirakloj kaj
signoj, kiujn Dio faris per li meze de vi, kiel vi mem
scias, 23 lin, laŭ la difinita intenco kaj antaŭscio de Dio
transdonitan, vi per la manoj de senleĝuloj krucumis
kaj mortigis; 24 lin Dio levis, malliginte la suferojn
de morto, ĉar estis neeble, ke li estu tenata de ĝi.
25 Ĉar David diris pri li: Ĉiam mi vidis la Eternulon
antaŭ mi, Ĉar Li estas ĉe mia dekstra mano, por ke
mi ne falu; 26 Tial ĝojis mia koro, raviĝis mia lango,
Eĉ mia karno ripozas en espero; 27 Ĉar Vi ne lasos
mian animon al Ŝeol, Vi ne permesos, ke Via sanktulo
forputru. (Hadēs g86) 28 Vi konigis al mi la vojojn de la
vivo, Vi plenigos min per ĝojo antaŭ Vi. 29 Fratoj, mi
povas libere paroli al vi pri la patriarko David, ke li
mortis kaj estis enterigita, kaj lia tombo estas ĉe ni
ĝis la nuna tago. 30 Estante do profeto, kaj sciante, ke
Dio ĵuris al li per ĵuro, sidigi sur lia trono iun el la
frukto de liaj lumboj, 31 li, antaŭvidante, parolis pri la
relevo de la Kristo, ke li ne estos lasita al Ŝeol, kaj lia
karno ne forputros. (Hadēs g86) 32 Ĉi tiun Jesuon relevis
Dio, pri kio ni ĉiuj estas atestantoj. 33 Levite do ĝis
dekstre de Dio, kaj ricevinte de la Patro la promeson
de la Sankta Spirito, li elverŝis tion, kion vi vidas
kaj aŭdas. 34 Ĉar David ne supreniris en la ĉielojn;
sed li mem diris: La Eternulo diris al mia Sinjoro:
Sidu dekstre de Mi, 35 Ĝis Mi faros viajn malamikojn
benketo por viaj piedoj. 36 Kun certeco do sciu la
tuta domo de Izrael, ke tiun Jesuon, kiun vi krucumis,
Dio faris Sinjoro kaj Kristo. 37 Kaj aŭdinte tion, ili
estis pikitaj en la koro, kaj diris al Petro kaj la aliaj
apostoloj: Kion ni faru, fratoj? 38 Kaj Petro diris al ili:
Ekpentu, kaj baptiĝu ĉiu el vi en la nomo de Jesuo
Kristo por forigo de pekoj, kaj vi ricevos la donacon
de la Sankta Spirito. 39 Ĉar la promeso estas por vi kaj
por viaj infanoj, kaj por ĉiuj ĝis malproksime, kiujn
alvokos la Eternulo, nia Dio. 40 Kaj per multaj aliaj
paroloj li atestis kaj alvokis ilin, dirante: Savu vin el
ĉi tiu perversa generacio. 41 Tiuj do, kiuj akceptis
lian parolon, baptiĝis, kaj en tiu tago aldoniĝis ĉirkaŭ
tri mil animoj. 42 Kaj ili persistis en la instruo de la
apostoloj kaj en la kunuleco, en la dispecigo de pano
kaj en preĝoj. 43 Kaj ĉiu animo havis timon, kaj multaj
mirakloj kaj signoj fariĝis per la apostoloj. 44 Kaj ĉiuj
kredantoj estis kune, kaj havis ĉion komuna; 45 kaj ili
vendis siajn havojn kaj posedaĵojn, kaj dividis ilin al
ĉiuj laŭ ĉies aparta bezono. 46 Kaj ĉiutage, vizitadante
unuanime la templon, kaj dispecigante panon dome,
ili prenis sian nutraĵon kun ĝojo kaj unueco de koro,
47 laŭdante Dion kaj havante favoron ĉe la tuta popolo.
Kaj la Sinjoro aldonis ĉiutage al la eklezio la savatojn.

3 Kaj Petro kaj Johano estis suprenirantaj en la
templon je la horo de preĝado, la naŭa. 2 Kaj unu
viro, lama de la patrina ventro, estis portata; oni lin
metis ĉiutage apud tiu pordego de la templo, kiu
estas nomata La Bela, por ke li petu pri almozoj la
enirantojn en la templon; 3 tiu, vidante Petron kaj
Johanon enirontajn en la templon, petis almozon.
4 Kaj Petro, fikse rigardante lin, kun Johano, diris:
Rigardu nin. 5 Kaj li atentis ilin, atendante ricevi ion
de ili. 6 Kaj Petro diris: Nek arĝentaĵon nek oraĵon
mi havas, sed kion mi havas, tion mi donas al vi. En
la nomo de Jesuo Kristo, la Nazaretano, piediru. 7
Kaj li prenis lin per la dekstra mano kaj lin levis; kaj
tuj liaj plandoj kaj liaj maleolostoj fortiĝis. 8 Kaj li
suprensalte stariĝis, kaj piediris; kaj li eniris kun ili en
la templon, piedirante kaj saltante, kaj laŭdante Dion.
9 Kaj la tuta popolo vidis lin piedirantan kaj laŭdantan
Dion; 10 kaj ili rekonis lin, ke li estas tiu, kiu sidis
por almozo apud la Bela Pordego de la templo, kaj ili
pleniĝis de mirego kaj konfuziĝo pri tio, kio okazis
al li. 11 Kaj dum li tenis Petron kaj Johanon, la tuta
popolo kunkuris al ili en la portiko nomata Salomona,
miregante. 12 Kaj Petro, vidante tion, respondis al
la popolo: Izraelidoj, kial vi miras pri ĉi tio? kaj kial
vi fikse rigardas nin, kvazaŭ per propra potenco aŭ
pieco ni igis lin piediri? 13 La Dio de Abraham kaj de
Isaak kaj de Jakob, la Dio de niaj patroj, gloris Sian
Servanton Jesuo, kiun vi transdonis, kaj malkonfesis
antaŭ la vizaĝo de Pilato, kiam ĉi tiu decidis liberigi
lin. 14 Sed vi malkonfesis la Sanktulon kaj Justulon, kaj
petis, ke mortiginto estu donita al vi, 15 kaj mortigis
la Estron de la vivo, kiun Dio relevis el la mortintoj,
pri kio ni estas atestantoj. 16 Kaj lia nomo, per fido en

lia nomo, fortigis ĉi tiun, kiun vi vidas kaj konas; kaj
la fido, kiu estas per li, donis al li ĉi tiun plensanecon
antaŭ vi ĉiuj. 17 Kaj nun, fratoj, mi scias, ke vi agis
de nescio, kiel ankaŭ viaj regantoj. 18 Sed tiel Dio
plenumis tion, kion Li antaŭanoncis per la buŝo de
ĉiuj profetoj, ke Lia Kristo suferos. 19 Pentu do, kaj
konvertiĝu, por ke viaj pekoj estu forviŝitaj, por ke
venu tempoj de refreŝiĝo de la vizaĝo de la Eternulo,
20 kaj por ke Li sendu la por vi difinitan Kriston,
Jesuon, 21 kiun la ĉielo devas ricevi ĝis la tempoj de
restarigo de ĉio, pri kiuj parolis Dio per la buŝo de Siaj
sanktaj profetoj jam de antikva tempo. (aiōn g165) 22
Ĉar Moseo diris: Profeton el viaj fratoj, similan al mi,
starigos por vi la Eternulo, via Dio; lin aŭskultu pri
ĉio ajn, kion li al vi parolos. 23 Kaj ĉiu animo, kiu ne
aŭskultos tiun profeton, ekstermiĝos el la popolo. 24
Kaj ĉiuj profetoj de post Samuel kaj liaj posteuloj, kiuj
parolis, antaŭanoncis ankaŭ tiujn tagojn. 25 Vi estas
la filoj de la profetoj, kaj de la interligo, kiun Dio faris
kun viaj patroj, dirante al Abraham: Kaj beniĝos per
via idaro ĉiuj gentoj de la tero. 26 Al vi unue Dio,
relevinte Sian Servanton, sendis lin, por vin beni,
deturnante ĉiun el vi for de liaj pekoj.

4 Kaj dum ili parolis al la popolo, venis sur ilin la
ĉefpastroj, la kapitano de la templo, kaj la Sadukeoj,
2 ĉagrenate, ke ili instruas la popolon kaj proklamas
per Jesuo la releviĝon el la mortintoj. 3 Kaj ili metis
sur ilin la manojn, kaj metis ilin en gardejon ĝis la
sekvanta tago; ĉar estis jam vespero. 4 Tamen multaj
el tiuj, kiuj aŭdis la vorton, kredis; kaj la nombro
de la viroj estis proksimume kvin mil. 5 Kaj en la
sekvanta tago kunvenis en Jerusalem la regantoj kaj
pliaĝuloj kaj skribistoj 6 kaj Anas, la ĉefpastro, kaj
Kajafas kaj Johano kaj Aleksandro, kaj ĉiuj, kiuj estis
de la ĉefpastra parencaro. 7 Kaj stariginte ilin en la
mezo, tiuj demandis: Per kia potenco aŭ per kia nomo
vi faris tion? 8 Tiam Petro, plenigite de la Sankta
Spirito, diris al ili: Regantoj de la popolo kaj pliaĝuloj,
9 se ni hodiaŭ estas eldemandataj pri la bonfaro al
la senfortulo, per kio li resaniĝis, 10 estu sciate al vi
ĉiuj kaj al la tuta popolo Izraela, ke en la nomo de
Jesuo Kristo, la Nazaretano, kiun vi krucumis, kiun
Dio levis el la mortintoj, ĉi tiu staras sana antaŭ vi.
11 Tiu estas la ŝtono, kiun vi konstruantoj malŝatis,
kaj kiu fariĝis ŝtono bazangula. 12 Kaj en neniu alia
estas savo; ĉar ne estas sub la ĉielo alia nomo, donita
inter homoj, per kiu ni devas esti savitaj. 13 Sed
kiam ili rimarkis la kuraĝon de Petro kaj Johano,
kaj komprenis, ke ili estas malkleruloj kaj nesciuloj,
ili miris, kaj rekonis ilin, ke ili estis kun Jesuo. 14
Kaj vidante la resanigiton starantan apud tiuj, ili ne
havis, kion kontraŭdiri. 15 Sed ordoninte ilin foriri
el la sinedrio, ili interkonsiliĝis, 16 dirante: Kion ni
devas fari al ĉi tiuj homoj? ĉar estas videble por ĉiuj
loĝantoj en Jerusalem, ke rimarkinda signo fariĝis per
ili, kaj nei ĝin ni ne povas. 17 Sed por ke ĝi ne plu
disvastiĝu inter la popolo, ni minacu ilin, ke ili de nun
ne parolu al iu ajn en ĉi tiu nomo. 18 Kaj ili vokis ilin,
kaj ordonis al ili tute ne paroli nek instrui en la nomo
de Jesuo. 19 Sed Petro kaj Johano responde diris al ili:
Ĉu estas juste antaŭ Dio aŭskulti vin prefere ol Dion,
vi juĝu; 20 ĉar ni ne povas ne paroli pri tio, kion ni
vidis kaj aŭdis. 21 Kaj ili, denove minacinte, liberigis
ilin, trovinte nenion, pro kio ili povus ilin puni, pro la
popolo; ĉar ĉiuj gloris Dion pro la faritaĵo. 22 Ĉar estis
pli ol kvardekjara la viro, sur kiu fariĝis ĉi tiu signo
resaniga. 23 Kaj liberigite, ili venis al siaj kunuloj kaj
rakontis ĉion, kion la ĉefpastroj kaj pliaĝuloj diris al
ili. 24 Kaj aŭdinte, ili levis la voĉon al Dio unuanime,
kaj diris: Ho Plejpotenculo, kiu faris la ĉielon kaj la
teron kaj la maron, kaj ĉion, kio estas en ili, 25 kaj kiu
per la Sankta Spirito, per la buŝo de nia patro David,
Via servanto, diris: Kial tumultas popoloj, Kaj gentoj
pripensas vanaĵon? 26 Leviĝis la reĝoj de la tero, Kaj
la regantoj kolektiĝis kune, Kontraŭ la Eternulo kaj
kontraŭ Lia Sanktoleito; 27 ĉar vere en ĉi tiu urbo
kolektiĝis kontraŭ Via sankta Servanto Jesuo, kiun
Vi sanktoleis, kune Herodo kaj Pontio Pilato kun la
gentoj kaj la popoloj de Izrael, 28 por fari ĉion, kion
Via mano kaj Via intenco antaŭdifinis. 29 Kaj nun, ho
Eternulo, rigardu iliajn minacojn; kaj donu al Viaj
sklavoj paroli Vian vorton kun plena kuraĝo, 30 dum
Vi etendos Vian manon por sanigado, kaj signoj kaj
mirakloj fariĝos per la nomo de Via sankta Servanto
Jesuo. 31 Kaj post ilia preĝado skuiĝis la loko, en kiu
ili kolektiĝis; kaj ili ĉiuj pleniĝis de la Sankta Spirito,
kaj parolis kuraĝe la vorton de Dio. 32 Kaj la anaro de
la kredantoj estis unukora kaj unuanima, kaj neniu
diris, ke io el lia havaĵo estas propra al li; sed ĉe
ili ĉio estis komuna. 33 Kaj kun granda potenco la
apostoloj atestis pri la releviĝo de la Sinjoro Jesuo;
kaj granda graco estis sur ĉiuj. 34 Inter ili neniu
havis mankon, ĉar ĉiuj posedantoj de bienoj aŭ domoj

vendis ilin, kaj alportis la prezon de la venditaĵoj 35
kaj metis ĝin antaŭ la piedoj de la apostoloj; kaj estis
disdonate al ĉiu laŭ ĉies aparta bezono. 36 Kaj Jozef,
kiu de la apostoloj estis alnomita Barnabas (tio estas,
Filo de Konsolo), Levido, Kiprano laŭ sia naskiĝo, 37
posedante kampon, vendis ĝin, kaj alportis la prezon
kaj metis ĝin antaŭ la piedoj de la apostoloj.

5 Sed unu viro, nomata Ananias, kun sia edzino
Sapfira vendis posedaĵon, 2 kaj retenis iom el la
prezo, kun la konsento de sia edzino, kaj iun parton
alportis kaj metis antaŭ la piedoj de la apostoloj. 3
Sed Petro diris: Ananias, kial Satano plenigis vian
koron tiel, ke vi mensogas al la Sankta Spirito kaj
retenas iom el la prezo de la bieno? 4 Dum ĝi restis,
ĉu ĝi ne estis via? kaj post la vendo, ĉu ĝi ne estis en
via rajto? Kial do ĉi tiun faron vi celis en via koro? vi
mensogis ne al homoj, sed al Dio. 5 Kaj aŭdante ĉi
tiujn vortojn, Ananias falis kaj senspiriĝis; kaj granda
timo venis sur ĉiujn aŭdantojn. 6 Kaj la junuloj leviĝis,
kaj lin ĉirkaŭvindis, kaj forportis kaj enterigis. 7 Kaj
post paso de ĉirkaŭ tri horoj eniris lia edzino, ne
sciante, kio okazis. 8 Kaj Petro ŝin demandis: Diru al
mi, ĉu por tiom vi vendis la bienon? Kaj ŝi respondis:
Jes, por tiom. 9 Kaj Petro respondis al ŝi: Kial estis
interkonsento inter vi, por inciti la Spiriton de la
Eternulo? jen la piedoj de tiuj, kiuj enterigis vian
edzon, estas apud la pordo, kaj ili vin forportos. 10
Kaj ŝi tuj falis apud liaj piedoj kaj senspiriĝis; kaj la
junuloj eniris, kaj trovis ŝin mortinta, kaj ŝin forportis
kaj enterigis apud ŝia edzo. 11 Kaj granda timo venis
sur la tutan eklezion kaj sur ĉiujn aŭdantajn pri tio.
12 Kaj per la manoj de la apostoloj estis faritaj multaj
signoj kaj mirindaĵoj meze de la popolo; kaj ili ĉiuj
estis unuanime en la portiko Salomona. 13 Sed el
la ceteraj neniu kuraĝis aliĝi al ili; tamen la popolo
gloris ilin; 14 kaj kredantoj pligrandnombre aldoniĝis
al la Sinjoro, amasoj da viroj kaj virinoj; 15 tiel, ke oni
elportis la malsanulojn sur la stratojn kaj kuŝigis ilin
sur litoj kaj kanapoj, por ke ĉe la preterpaso de Petro,
almenaŭ lia ombro ombru iun el ili. 16 Kunvenis ankaŭ
en Jerusalemon la amaso el la ĉirkaŭaj urboj, portante
malsanulojn kaj la turmentatajn de malpuraj spiritoj,
kaj ĉiuj estis sanigitaj. 17 Sed stariĝis la ĉefpastro, kaj
ĉiuj, kiuj estis kun li (tio estas la sekto de la Sadukeoj),
kaj ili pleniĝis de ĵaluzo, 18 kaj ĵetis manojn sur la
apostolojn, kaj metis ilin en la publikan gardejon. 19
Sed anĝelo de la Eternulo nokte malfermis la pordojn
de la karcero, kaj elkondukis ilin, kaj diris: 20 Iru, kaj
staru kaj parolu en la templo al la popolo ĉiujn vortojn
pri ĉi tiu Vivo. 21 Kaj tion aŭdinte, ili eniris ĉe la tagiĝo
en la templon kaj ekinstruis. Sed venis la ĉefpastro,
kaj tiuj, kiuj estis kun li, kaj kunvokis la sinedrion
kaj la tutan senaton de la Izraelidoj, kaj sendis al la
malliberejo, por ilin venigi. 22 Sed la oficistoj venis,
kaj ne trovis ilin en la karcero, kaj ili revenis kaj
rakontis, 23 dirante: Ni ja trovis la malliberejon ŝlosita
tute fortike, kaj la gardistojn starantaj antaŭ la pordoj;
sed malferminte, ni trovis interne neniun. 24 Kiam
do la kapitano de la templo kaj la ĉefpastroj aŭdis
ĉi tiujn vortojn, ili embarasiĝis pri ili, kio fariĝos
el tiu afero. 25 Tiam iu venis, kaj sciigis al ili: Jen
la viroj, kiujn vi metis en la karceron, estas en la
templo, kaj staras kaj instruas la popolon. 26 Tiam
foriris la kapitano kun la oficistoj, kaj alkondukis ilin
sen perforto; ĉar ili timis la popolon, por ke ili ne
estu priĵetitaj per ŝtonoj. 27 Kaj oni alkondukis ilin
kaj starigis ilin antaŭ la sinedrio. Kaj la ĉefpastro
ilin demandis, 28 dirante: Ni severe ordonis al vi,
ke vi ne instruu en ĉi tiu nomo; kaj jen vi plenigis
Jerusalemon per via instruado, kaj intencas survenigi
sur nin la sangon de tiu homo. 29 Tiam Petro kaj la
apostoloj responde diris: Oni devas obei Dion prefere
ol homojn. 30 La Dio de niaj patroj levis Jesuon, kiun
vi pereigis, pendigante lin sur lignaĵo. 31 Lin altigis
Dio per Sia dekstra mano, por esti Estro kaj Savanto,
por doni al Izrael penton kaj pardonadon de pekoj.
32 Kaj ni estas atestantoj de ĉi tiuj vortoj, kiel ankaŭ
estas la Sankta Spirito, kiun Dio donis al tiuj, kiuj Lin
obeas. 33 Kaj ili, aŭdinte tion, estis pikitaj en la koro,
kaj ili konsiliĝis, por pereigi ilin. 34 Sed unu Fariseo,
nomata Gamaliel, leĝinstruisto honorata ĉe la tuta
popolo, ekstaris en la sinedrio, kaj ordonis, ke oni
eksteren forigu la homojn por kelka tempo. 35 Kaj li
diris al ili: Izraelidoj, estu singardaj rilate al ĉi tiuj
homoj pri tio, kion vi celas fari. 36 Ĉar antaŭ ĉi tiuj
tagoj leviĝis Teŭdas, dirante, ke li estas ia persono;
kaj al li aliĝis nombro da viroj, ĉirkaŭ kvarcent; kaj li
pereis; kaj ĉiuj, kiuj lin obeis, dispeliĝis kaj nuliĝis.
37 Post tiu leviĝis Judas, Galileano, en la tagoj de la
registrado, kaj fortiris post si homojn; li ankaŭ pereis,
kaj ĉiuj, kiuj lin obeis, dispeliĝis. 38 Kaj nun mi diras
al vi: Detenu vin de ĉi tiuj homoj, kaj lasu ilin; ĉar,
se ĉi tiu intenco aŭ ĉi tiu laboro estas de homoj, ĝi

renversiĝos; 39 sed se ĝi estas de Dio, vi ilin ne povos
renversi; aŭ eble iel vi troviĝos batalantaj kontraŭ Dio.
40 Kaj ili konsentis kun li; kaj alvokinte la apostolojn
kaj batinte ilin, ili ordonis, ke ili ne parolu en la nomo
de Jesuo, kaj liberigis ilin. 41 Sed ili foriris de antaŭ
la sinedrio, ĝojante, ke ili estis juĝitaj indaj suferi
malhonoron pro la Nomo. 42 Kaj ĉiutage en la templo
kaj dome ili ne ĉesis instrui kaj prediki Jesuon, la
Kriston.

6 Kaj en tiuj tagoj, kiam la nombro de la disĉiploj
multiĝis, fariĝis murmurado de la Grekaj Judoj
kontraŭ la Hebreaj pro tio, ke iliaj vidvinoj estas
preterlasataj en la ĉiutaga servado. 2 Kaj la dek du,
alvokinte la amason de la disĉiploj, diris: Ne estas
dezirinde, ke ni forlasu la vorton de Dio, por servi ĉe
tabloj. 3 Tial elserĉu, fratoj, el inter vi sep homojn,
bone atestatajn, plenajn de la Spirito kaj de saĝo,
kiujn ni difinos por tiu afero. 4 Sed ni persistos en
preĝado kaj la servado de la Vorto. 5 Kaj tiu diro
plaĉis al la tuta amaso; kaj ili elektis Stefanon, viron
plenan de fido kaj de la Sankta Spirito, kaj Filipon kaj
Proĥoron kaj Nikanoron kaj Timonon kaj Parmenason,
kaj Nikolaon, prozeliton el Antioĥia; 6 tiujn ili starigis
antaŭ la apostoloj; kaj ĉi tiuj, preĝinte, metis sur
ilin la manojn. 7 Kaj la vorto de Dio kreskis, kaj la
nombro de la disĉiploj multiĝis treege en Jerusalem,
kaj granda aro el la pastroj obeis al la fido. 8 Kaj
Stefano, plena de graco kaj potenco, faris grandajn
mirindaĵojn kaj signojn inter la popolo. 9 Sed stariĝis
iuj el la sinagogo nomata la Sinagogo de la Liberigitoj,
kaj el la Kirenanoj kaj el la Aleksandrianoj kaj el la
homoj el Kilikio kaj Azio; kaj ili diskutis kun Stefano.
10 Kaj ili ne povis rezisti al la saĝeco kaj la Spirito,
per kiu li parolis. 11 Tiam ili subinstigis virojn, kiuj
diris: Ni aŭdis lin paroli blasfemajn vortojn kontraŭ
Moseo kaj kontraŭ Dio. 12 Kaj ili incitis la popolon
kaj la pliaĝulojn kaj la skribistojn, kaj venis sur lin
kaj kaptis lin, kaj kondukis lin al la sinedrio, 13 kaj
starigis mensogajn atestantojn, kiuj diris: Ĉi tiu homo
ne ĉesas paroli vortojn kontraŭ ĉi tiu sankta loko
kaj la leĝo; 14 ĉar ni aŭdis lin diri, ke ĉi tiu Jesuo,
la Nazaretano, detruos ĉi tiun lokon, kaj ŝanĝos la
kutimojn, kiujn Moseo transdonis al ni. 15 Kaj ĉiuj,
kiuj sidis en la sinedrio, fikse rigardante lin, vidis lian
vizaĝon kvazaŭ vizaĝon de anĝelo.

7 Tiam diris la ĉefpastro: Ĉu ĉi tiuj aferoj estas tiel?
2 Kaj tiu diris: Fratoj kaj patroj, aŭskultu. La Dio de
gloro aperis al nia patro Abraham, kiam li estis en
Mezopotamio, antaŭ ol li loĝis en Ĥaran, 3 kaj diris al
li: Iru el via lando kaj de via parencaro, kaj venu en
tiun landon, kiun Mi montros al vi. 4 Tiam li iris el la
lando de la Ĥaldeoj, kaj loĝis en Ĥaran; kaj el tie, post
la morto de lia patro, Li transloĝigis lin en ĉi tiun
landon, kie vi nun loĝas; 5 kaj Li donis al li nenian
heredaĵon en ĝi, eĉ ne piedspacon, sed Li promesis
doni ĝin al li por posedaĵo kaj al lia idaro post li,
kiam li ankoraŭ ne havis infanon. 6 Kaj Dio parolis
jene: ke lia idaro loĝos en fremda lando, kaj ke oni
sklavigos kaj turmentos ilin dum kvarcent jaroj. 7 Kaj
la popolon, ĉe kiu ili estos sklavoj, Mi juĝos, diris Dio;
kaj poste ili eliros kaj faros servon al Mi sur ĉi tiu loko.
8 Kaj Li donis al li la interligon de cirkumcido; kaj tiel
Abraham naskigis Isaakon kaj cirkumcidis lin en la
oka tago, kaj Isaak naskigis Jakobon, kaj Jakob la dek
du patriarkojn. 9 Kaj la patriarkoj, enviante Jozefon,
lin vendis en Egiptujon; kaj Dio estis kun li, 10 kaj
liberigis lin el ĉiuj liaj suferoj, kaj donis al li favoron
kaj saĝecon antaŭ Faraono, reĝo de Egiptujo; kaj ĉi tiu
estrigis lin super Egiptujo kaj super lia tuta domo.
11 Kaj venis malsato sur la tutan landon Egiptujon
kaj Kanaanon, kaj granda sufero; kaj niaj patroj ne
trovis nutraĵon. 12 Sed kiam Jakob aŭdis, ke estas
greno en Egiptujo, li sendis unue niajn patrojn. 13
Kaj la duan fojon Jozef rekonatiĝis al siaj fratoj, kaj
la gento de Jozef estis montrita al Faraono. 14 Kaj
Jozef sendis, kaj alvokis sian patron Jakob, kaj la tutan
parencaron, sepdek kvin animojn. 15 Kaj Jakob venis
en Egiptujon, kaj mortis li mem kaj niaj patroj; 16
kaj ili estis transportitaj al Ŝeĥem kaj metitaj en la
tombon, kiun Abraham aĉetis por prezo arĝenta de la
filoj de Ĥamor en Ŝeĥem. 17 Sed kiam alproksimiĝis
la tempo de la promeso, kiun Dio ĵuris al Abraham,
la popolo diskreskis kaj multiĝis en Egiptujo, 18 ĝis
aperis alia reĝo, kiu ne konis Jozefon. 19 Tiu agis ruze
kontraŭ nia gento, kaj premis niajn patrojn tiel, ke ili
elĵetis siajn infanojn, por ke ili ne vivadu. 20 En tiu
tempo Moseo naskiĝis, kaj estis eksterordinare bela;
kaj li estis nutrata tri monatojn en la domo de sia
patro; 21 kaj kiam oni lin elĵetis, prenis lin la filino de
Faraono kaj lin nutris kiel sian filon. 22 Kaj Moseo
estis instruita en la tuta saĝeco de la Egiptoj, kaj estis
potenca per siaj vortoj kaj agoj. 23 Sed kiam li jam

havis la aĝon de kvardek jaroj, venis en lian koron la
penso viziti siajn fratojn, la Izraelidojn. 24 Kaj vidinte
unu el ili suferi maljustecon, li defendis kaj venĝis
la premiton, batante la Egipton; 25 kaj li supozis, ke
liaj fratoj komprenos, ke Dio per lia mano donas al
ili savon, sed ili ne komprenis. 26 Kaj en la sekvanta
tago li aperis al ili, dum ili malpacis, kaj li deziris
repacigi ilin, dirante: Ho viroj, vi estas fratoj; kial vi
malbonfaras unu al alia? 27 Sed la ofendanto de sia
proksimulo forpuŝis lin, dirante: Kiu faris vin estro
kaj juĝanto super ni? 28 Ĉu vi celas mortigi min, kiel
vi mortigis la Egipton hieraŭ? 29 Kaj ĉe tiu parolo
Moseo forkuris kaj ekloĝis en la lando Midjana, kie li
naskigis du filojn. 30 Kaj post paso de kvardek jaroj
anĝelo aperis al li en la dezerto apud monto Sinaj, en
flama fajro en arbetaĵo. 31 Kaj kiam Moseo ĝin vidis, li
miris pri la fenomeno; kaj kiam li alproksimiĝis, por
rigardi, venis al li voĉo de la Eternulo: 32 Mi estas la
Dio de viaj patroj, la Dio de Abraham, kaj de Isaak, kaj
de Jakob. Kaj Moseo tremis, kaj ne kuraĝis rigardi. 33
Kaj la Eternulo diris al li: Deprenu la ŝuojn de viaj
piedoj; ĉar la loko, sur kiu vi staras, estas tero sankta.
34 Mi rigardis, kaj vidis la mizeron de Mia popolo,
kiu estas en Egiptujo, kaj Mi aŭdis ĝian ĝemadon,
kaj Mi malsupreniris, por savi ĝin; venu do, kaj Mi
vin sendos en Egiptujon. 35 Tiun Moseon, kiun ili
malakceptis, dirante: Kiu faris vin estro kaj juĝanto?
tiun Dio sendis, por esti estro kaj savanto, per la
mano de la anĝelo, kiu aperis al li en la arbetaĵo. 36
Tiu elkondukis ilin, farinte mirindaĵojn kaj signojn
en Egiptujo, kaj en la Ruĝa Maro, kaj en la dezerto
dum kvardek jaroj. 37 Ĝi estis tiu Moseo, kiu diris
al la Izraelidoj: Profeton el viaj fratoj, similan al mi,
starigos por vi la Eternulo, via Dio. 38 Li estis tiu, kiu
estis en la komunumo en la dezerto kun la anĝelo, kiu
parolis kun li sur la monto Sinaj, kaj estis kun niaj
patroj; kaj ricevis vivajn orakolojn, por doni al ni; 39
al tiu niaj patroj ne volis esti obeemaj, sed forpuŝis
lin, kaj returniĝis en sia koro al Egiptujo, 40 dirante al
Aaron: Faru al ni diojn, kiuj irus antaŭ ni; ĉar pri tiu
Moseo, kiu elkondukis nin el la lando Egipta, ni ne
scias, kio okazis al li. 41 Kaj ili faris bovidon en tiuj
tagoj, kaj alportis oferon al la idolo, kaj ĝojis pri la
faritaĵo de siaj manoj. 42 Tiam Dio turniĝis, kaj lasis
ilin servi al la armeo de la ĉielo, kiel estas skribite en
la libro de la profetoj: Ĉu vi alportis al Mi buĉitajn
bestojn kaj oferojn Dum kvardek jaroj en la dezerto,
ho domo de Izrael? 43 Kaj vi portis la tabernaklon de
Moleĥ Kaj la stelon de la dio Refan, La figuraĵojn, kiujn
vi faris, por adorkliniĝi al ili; Kaj Mi elpatrujigos vin
preter Babelon. 44 Kun niaj patroj en la dezerto estis
la tabernaklo de atesto, kiel ordonis Tiu, kiu parolis al
Moseo, ke li konstruu ĝin laŭ la modelo, kiun li vidis.
45 Ĝin ankaŭ niaj patroj siavice enportis kun Josuo,
kiam ili eniris en la posedaĵon de la nacioj, kiujn Dio
forpuŝis antaŭ niaj patroj, ĝis la tagoj de David; 46
kiu trovis favoron antaŭ Dio, kaj petis trovi loĝejon
por la Dio de Jakob. 47 Sed Salomono konstruis por Li
domon. 48 Tamen la Plejaltulo ne loĝas en manfaritaj
temploj, kiel diris la profeto: 49 La ĉielo estas Mia
trono, Kaj la tero estas Mia piedbenketo; Kian domon
vi konstruos por Mi? diras la Eternulo; Kaj kia estas la
loko por Mia ripozo? 50 Ĉu ne faris Mia mano ĉion
tion? 51 Vi malmolnukaj, vi necirkumciditaj je koro
kaj oreloj, vi ĉiam rezistas al la Sankta Spirito; kiel viaj
patroj, tiel ankaŭ vi. 52 Kiun el la profetoj viaj patroj
ne persekutis? kaj ili mortigis tiujn, kiuj antaŭmontris
pri la alveno de la Justulo, de kiu vi nun fariĝis la
perfidintoj kaj mortigintoj; 53 vi, kiuj ricevis la leĝon,
kiel anoncitan per anĝeloj, sed ĝin ne observis. 54
Kaj aŭdante tion, ili koleriĝis en la koro, kaj grincigis
kontraŭ li siajn dentojn. 55 Sed li, plena de la Sankta
Spirito, rigardis fikse al la ĉielo, kaj vidis la gloron
de Dio, kaj Jesuon starantan dekstre de Dio, 56 kaj
diris: Jen mi vidas la ĉielon malfermitan kaj la Filon
de homo starantan dekstre de Dio. 57 Sed ili ekkriis
per laŭta voĉo, kaj fermis siajn orelojn, kaj kuregis
sur lin unuanime, 58 kaj elpelis lin el la urbo, kaj ĵetis
sur lin ŝtonojn; kaj la atestantoj demetis siajn vestojn
apud la piedoj de junulo, nomata Saŭlo. 59 Kaj ili
ŝtonmortigis Stefanon, vokantan kaj dirantan: Jesuo,
Sinjoro, akceptu mian spiriton. 60 Kaj li genuiĝis, kaj
kriis per laŭta voĉo: Sinjoro, ne metu sur ilin ĉi tiun
pekon. Kaj tion dirinte, li endormiĝis.

8 Kaj Saŭlo konsentis al lia mortigo. Kaj en tiu tago
komenciĝis granda persekutado kontraŭ la eklezio,
kiu estis en Jerusalem; kaj ĉiuj estis dispelitaj tra
la regionoj de Judujo kaj Samario, kun escepto de
la apostolaro. 2 Kaj piuloj enterigis Stefanon, kaj
faris pri li grandan funebron. 3 Sed Saŭlo atakis la
eklezion, enirante en ĉiun domon, kaj li trenis virojn
kaj virinojn, kaj transdonis ilin en malliberejon. 4 Sed
la dispelitoj trairis, predikante la vorton. 5 Kaj Filipo,

malsuprenirinte en la urbon Samario, proklamis al
ili la Kriston. 6 Kaj la homamaso unuanime atentis
la parolojn de Filipo, kiam ili lin aŭdis kaj vidis la
signojn, kiujn li faris. 7 Ĉar el multaj el ili, kiuj havis
malpurajn spiritojn, ĉi tiuj elvenis, kriante per laŭta
voĉo; kaj multaj paralizuloj kaj lamuloj resaniĝis. 8
Kaj estis granda ĝojo en tiu urbo. 9 Sed unu viro,
nome Simon, jam antaŭe faradis magion en la urbo
kaj sorĉadis la popolon de Samario, dirante, ke li estas
iu granda; 10 al li atentadis ili ĉiuj, de la malgrandaj
ĝis la grandaj, dirante: Ĉi tiu homo estas la granda
potenco de Dio. 11 Kaj ili atentadis lin, ĉar li jam de
longe sorĉis ilin per magiaĵoj. 12 Sed kiam ili kredis al
Filipo, predikanta la evangelion pri la regno de Dio kaj
la nomo de Jesuo Kristo, ili baptiĝis, viroj kaj virinoj.
13 Kaj Simon mem ankaŭ kredis; kaj kiam li baptiĝis, li
forte aliĝis al Filipo, kaj vidante signojn kaj grandajn
miraklojn faratajn, li konfuziĝis. 14 Kaj la apostoloj en
Jerusalem, aŭdinte, ke Samario akceptis la vorton de
Dio, sendis al ili Petron kaj Johanon; 15 kiuj, alveninte,
preĝis por ili, ke ili ricevu la Sanktan Spiriton, 16
ĉar ankoraŭ sur neniun el ili li falis; ili nur baptiĝis
en la nomon de la Sinjoro Jesuo. 17 Tiam ili metis la
manojn sur ilin, kaj ili ricevis la Sanktan Spiriton.
18 Kaj kiam Simon vidis, ke la Sankta Spirito estis
donata per la surmetado de la manoj de la apostoloj,
li proponis al ili monon, 19 kaj diris: Donu ankaŭ al
mi ĉi tiun rajton, por ke ĉiu ajn, sur kiun mi metos
la manojn, ricevu la Sanktan Spiriton. 20 Sed Petro
diris al li: Via arĝentaĵo iru kun vi en pereon, ĉar
vi pensis ricevi per mono la donacon de Dio. 21 Vi
havas nek parton nek loton en tiu afero, ĉar via koro
ne estas rekta antaŭ Dio. 22 Pentu do pri tiu via
malboneco, kaj preĝu al la Eternulo, se eble la penso
de via koro estu pardonita al vi. 23 Ĉar mi vidas, ke
vi estas en la galo de maldolĉeco kaj en la kateno
de maljusteco. 24 Kaj Simon responde diris: Preĝu
vi al la Eternulo por mi, ke trafu min neniom el tio,
pri kio vi parolis. 25 Ili do, atestinte kaj parolinte la
vorton de la Sinjoro, revenis al Jerusalem, kaj predikis
la evangelion al multaj vilaĝoj de la Samarianoj. 26
Sed anĝelo de la Eternulo parolis al Filipo, dirante:
Leviĝu, kaj iru suden ĝis la vojo, kiu kondukas de
Jerusalem al Gaza; tio estas dezerto. 27 Kaj li leviĝis,
kaj ekiris; kaj jen viro, Etiopo, eŭnuko, potenculo sub
Kandake, reĝino de la Etiopoj, kaj kiu estis super ŝia
tuta trezoro, jam venis al Jerusalem, por adorkliniĝi;
28 tiu vojaĝis returne, kaj, sidante en sia ĉaro, legis la
profeton Jesaja. 29 Kaj la Spirito diris al Filipo: Aliru,
kaj aliĝu al tiu ĉaro. 30 Kaj Filipo alkuris, kaj aŭdis lin
legi la profeton Jesaja, kaj diris: Ĉu vi komprenas tion,
kion vi legas? 31 Kaj tiu diris: Kiel mi povas, se neniu
min gvidas? Kaj li petis Filipon, ke li supreniru kaj
sidiĝu kun li. 32 La peco de la Skribo, kiun li legis, estis
jena: Li estis kondukata kiel ŝafo al la buĉo; Kaj kiel
ŝafido muta antaŭ sia tondanto, Li ne malfermis sian
buŝon; 33 En lia humiliĝo lia juĝo estis deprenita; Pri
lia generacio kiu rakontos? Ĉar lia vivo estas prenita
for de la tero. 34 Kaj la eŭnuko responde al Filipo diris:
Mi petas vin, pri kiu parolis la profeto ĉi tion? ĉu pri
si, aŭ pri iu alia? 35 Kaj Filipo malfermis sian buŝon,
kaj komencante de tiu Skribo, predikis al li Jesuon. 36
Kaj dum ili iris sur la vojo, ili alvenis al iu akvo; kaj
la eŭnuko diris: Jen estas akvo; kio malhelpas min
baptiĝi? 37 Kaj Filipo diris: Se vi kredas per via tuta
koro, tio estas permesata. Kaj li respondis: Mi kredas,
ke Jesuo Kristo estas la Filo de Dio. 38 Kaj li ordonis,
ke la ĉaro haltu, kaj ili ambaŭ malsupreniris en la
akvon, Filipo kaj la eŭnuko; kaj li baptis lin. 39 Kaj
kiam ili supreniris el la akvo, la Spirito de la Eternulo
forkaptis Filipon; kaj la eŭnuko ne plu lin vidis, kaj
li iris sian vojon, ĝojante. 40 Sed Filipo troviĝis en
Aŝdod; kaj trapasante, li predikis la evangelion en ĉiuj
urboj, ĝis li alvenis en Cezarean.

9 Kaj Saŭlo, ankoraŭ spirante minacojn kaj mortigon
kontraŭ la disĉiploj de la Sinjoro, iris al la ĉefpastro,
2 kaj petis de li leterojn al la sinagogoj en Damasko,
por ke, se li eble trovos homojn, aliĝintajn al la Vojo,
ĉu virojn aŭ virinojn, li alkonduku ilin katenitajn
al Jerusalem. 3 Kaj dum li vojaĝis, li alproksimiĝis
al Damasko; kaj subite ekbrilegis ĉirkaŭ li lumo el
la ĉielo; 4 kaj li falis sur la teron, kaj aŭdis voĉon
dirantan al li: Saŭlo, Saŭlo, kial vi min persekutas? 5
Kaj li diris: Kiu vi estas, ho Sinjoro? Kaj tiu diris: Mi
estas Jesuo, kiun vi persekutas; 6 sed leviĝu, kaj eniru
en la urbon, kaj estos dirite al vi, kion vi devas fari. 7
Kaj liaj kunvojaĝantoj staris mutaj, aŭdante la voĉon,
sed vidante neniun. 8 Kaj Saŭlo leviĝis de la tero; kaj
kiam liaj okuloj malfermiĝis, li vidis nenion; kaj ili
kondukis lin je la mano, kaj venigis lin en Damaskon.
9 Kaj li estis sen vidpovo tri tagojn; kaj ne manĝis, nek
trinkis. 10 Kaj en Damasko estis unu disĉiplo nomata
Ananias; kaj la Sinjoro diris al li en vizio: Ananias. Kaj

li respondis: Jen mi, Sinjoro. 11 Kaj la Sinjoro diris al
li: Leviĝu, kaj iru sur la straton, kiun oni nomas Rekta,
kaj serĉu en la domo de Judas viron, nomatan Saŭlo, el
Tarso; ĉar jen li preĝas; 12 kaj li vidis viron, nomatan
Ananias, enirantan kaj metantan sur lin la manojn,
por ke li ricevu vidpovon. 13 Sed Ananias respondis:
Sinjoro, mi aŭdis de multaj pri ĉi tiu viro, kiom da
malbono li faris kontraŭ viaj sanktuloj en Jerusalem;
14 kaj ĉi tie li havas de la ĉefpastroj aŭtoritaton kateni
ĉiujn, kiuj vokas vian nomon. 15 Sed la Sinjoro diris
al li: Ekiru, ĉar li estas elektita ilo por mi, por porti
mian nomon antaŭ la nacianoj kaj la reĝoj kaj la
Izraelidoj; 16 ĉar mi montros al li, kiom li devas suferi
pro mia nomo. 17 Kaj Ananias ekiris, kaj eniris en la
domon, kaj metinte sur lin la manojn, diris: Frato
Saŭlo, min sendis la Sinjoro Jesuo, kiu aperis al vi en
la vojo, laŭ kiu vi venis, por ke vi ricevu vidpovon
kaj pleniĝu de la Sankta Spirito. 18 Kaj tuj falis de
liaj okuloj kvazaŭ skvamoj; kaj li tuj ricevis vidpovon,
kaj leviĝis kaj baptiĝis; 19 kaj preninte nutraĵon, li
refortiĝis. Kaj dum kelke da tagoj li restis kun la
disĉiploj en Damasko. 20 Kaj en la sinagogoj li tuj
proklamis Jesuon, ke li estas la Filo de Dio. 21 Kaj
miregis ĉiuj, kiuj lin aŭdis, kaj ili diris: Ĉu li ne estas
tiu, kiu en Jerusalem pereigis tiujn, kiuj vokis ĉi tiun
nomon? kaj li venis ĉi tien por tio, ke li konduku
ilin katenitajn antaŭ la ĉefpastrojn. 22 Sed Saŭlo
des pli fortiĝis, kaj li konfuzis la Judojn loĝantajn
en Damasko, pruvante, ke tiu estas la Kristo. 23 Kaj
post la paso de multaj tagoj, la Judoj kune konsiliĝis,
por lin mortigi; 24 sed ilia konspiro sciiĝis al Saŭlo.
Kaj ili observadis la pordegojn tage kaj nokte, por
lin mortigi; 25 sed liaj disĉiploj prenis lin nokte, kaj
mallevis lin tra la urba muro, malsupren lasante lin en
korbego. 26 Kaj kiam li venis en Jerusalemon, li provis
aliĝi al la disĉiploj; kaj ĉiuj lin timis, ne kredante,
ke li estas disĉiplo. 27 Sed Barnabas prenis lin, kaj
kondukis lin al la apostoloj, kaj rakontis al ili, kiel li
sur la vojo vidis la Sinjoron, kiu ankaŭ parolis al li,
kaj kiel en Damasko li sentime parolis en la nomo
de Jesuo. 28 Kaj li estis kun ili, enirante kaj elirante
en Jerusalem, 29 kaj sentime predikante en la nomo
de la Sinjoro; kaj li parolis kaj disputadis kontraŭ la
Grekaj Judoj; sed ili entreprenis mortigi lin. 30 Kaj
la fratoj, eksciinte tion, kondukis lin al Cezarea, kaj
forsendis lin al Tarso. 31 Kaj la eklezio tra la tuta
Judujo kaj Galileo kaj Samario havis pacon kaj ricevis
edifon; kaj iradante en la timo de la Sinjoro kaj en la
konsolo de la Sankta Spirito, ĝi kreskis. 32 Kaj dum
Petro trairis ĉiujn regionojn, li ankaŭ malsupreniris al
la sanktuloj loĝantaj en Lida. 33 Kaj tie li trovis unu
viron, nomatan Eneas, kiu kuŝadis en sia lito jam ok
jarojn; ĉar li estis paralizulo. 34 Kaj Petro diris al li:
Eneas, Jesuo Kristo vin sanigas; leviĝu, kaj ordigu vian
liton. Kaj li tuj leviĝis. 35 Kaj ĉiuj loĝantoj en Lida
kaj en Ŝaron lin vidis, kaj turniĝis al la Sinjoro. 36
Kaj estis en Jafo unu disĉiplino, nomata Tabita, kiu
laŭ traduko estas nomata Dorkas; ŝi estis plena de
bonfaroj kaj almozoj, kiujn ŝi faris. 37 Kaj en tiu tempo
ŝi malsaniĝis, kaj mortis; kaj ili ŝin lavis kaj metis en
supran ĉambron. 38 Kaj ĉar Lida estis proksime de
Jafo, la disĉiploj, aŭdinte, ke Petro estas tie, sendis al
li du virojn, por petegi lin: Ne prokrastu veni al ni. 39
Kaj Petro leviĝis kaj iris kun ili. Kaj kiam li alvenis, ili
lin kondukis en la supran ĉambron; kaj alestis apud
li ĉiuj vidvinoj, plorante kaj montrante tunikojn kaj
vestojn, kiujn Dorkas faris, kiam ŝi estis ankoraŭ kun
ili. 40 Sed Petro, formetinte ĉiujn, genuiĝis kaj preĝis,
kaj, turninte sin al la korpo, li diris: Tabita, leviĝu. Kaj
ŝi malfermis siajn okulojn, kaj, vidinte Petron, ŝi side
leviĝis. 41 Kaj li donis al ŝi la manon kaj starigis ŝin,
kaj, vokinte la sanktulojn kaj vidvinojn, li prezentis
ŝin vivanta. 42 Kaj tio fariĝis sciata tra la tuta Jafo, kaj
multaj kredis al la Sinjoro. 43 Kaj dum multe da tagoj
li loĝis en Jafo ĉe unu Simon, tanisto.

10 En Cezarea estis unu viro, nomata Kornelio,
centestro de la kohorto nomata la Itala, 2 viro
pia, kiu timis Dion kune kun sia tuta familio, kaj
donis multajn almozojn al la popolo, kaj preĝis al
Dio konstante. 3 Tiu vidis klare en vizio, ĉirkaŭ la
naŭa horo de la tago, anĝelon de Dio, alvenantan
al li, kaj dirantan al li: Kornelio. 4 Kaj ĉi tiu, fikse
rigardante lin kaj timante, diris: Kio estas, Sinjoro?
Kaj li diris al li: Viaj preĝoj kaj viaj almozoj supreniris
kiel memoraĵo antaŭ Dio. 5 Kaj nun sendu virojn al
Jafo, kaj venigu Simonon, kiu estas alnomata Petro; 6
li gastas ĉe unu Simon, tanisto, kies domo estas apud
la marbordo. 7 Kaj kiam foriris la anĝelo, kiu parolis al
li, li alvokis du el siaj domservantoj, kaj pian soldaton
el tiuj, kiuj ĉiam deĵoris apud li; 8 kaj klariginte ĉion
al ili, li sendis ilin al Jafo. 9 Kaj en la sekvanta tago,
kiam ili vojaĝis kaj alproksimiĝis al la urbo, Petro
supreniris sur la tegmenton, por preĝi, ĉirkaŭ la sesa
horo; 10 kaj li fariĝis malsata, kaj deziris manĝi; sed

dum oni pretigis, falis sur lin ekstazo; 11 kaj li vidis la
ĉielon malfermitan, kaj ian ujon malsuprenirantan,
kvazaŭ grandan tukon, mallevatan per la kvar anguloj
sur la teron; 12 kaj en ĝi troviĝis ĉiaj kvarpiedaj bestoj
kaj rampaĵoj de la tero kaj birdoj de la ĉielo. 13 Kaj
venis voĉo al li: Leviĝu, Petro; buĉu kaj manĝu. 14 Sed
Petro diris: Ho ne, Sinjoro, ĉar mi neniam manĝis ion
profanan aŭ malpuran. 15 Kaj voĉo venis al li denove
duan fojon: Kion Dio purigis, tion vi ne nomu profana.
16 Kaj tio estis farita trifoje; kaj la ujo estis tuj prenita
for en la ĉielon. 17 Kaj dum Petro spirite embarasiĝis,
kia povas esti la vizio, kiun li vidis, jen la viroj senditaj
de Kornelio, eldemandinte pri la domo de Simon,
staris antaŭ la pordo, 18 kaj vokis kaj demandis, ĉu
Simon, kiu estas alnomata Petro, tie gastas. 19 Kaj dum
Petro pripensis pri la vizio, la Spirito diris al li: Jen tri
viroj vin serĉas. 20 Sed leviĝu, kaj malsupreniru, kaj
vojaĝu kun ili, tute ne hezitante; ĉar mi ilin sendis.
21 Kaj Petro malsupreniris al la viroj, kaj diris: Jen
mi estas tiu, kiun vi serĉas; kia estas la kaŭzo, pro
kiu vi venis? 22 Kaj ili diris: Kornelio, centestro, viro
justa kaj timanta Dion, kaj bone atestata de la tuta
nacio de la Judoj, estas avertita de sankta anĝelo, ke li
venigu vin al sia domo kaj aŭdu parolojn de vi. 23
Tial li envokis kaj gastigis ilin. Kaj en la sekvanta
tago li leviĝis, kaj foriris kun ili, kaj iuj fratoj el Jafo
lin akompanis. 24 Kaj la morgaŭan tagon ili eniris
en Cezarean. Kaj Kornelio atendis ilin, kunvokinte
siajn parencojn kaj intimajn amikojn. 25 Kaj kiam
Petro estis eniranta, Kornelio lin renkontis, kaj, falinte
antaŭ liaj piedoj, adorkliniĝis al li. 26 Sed Petro lin
levis, dirante: Stariĝu; mi mem ankaŭ estas homo. 27
Kaj interparolante kun li, li eniris, kaj trovis multajn
kunvenintajn; 28 kaj li diris al ili: Vi mem scias, kiel
kontraŭleĝe estas por Judo kamaradiĝi aŭ aliri al
alinaciano; sed Dio min admonis, ke mi ne nomu ian
homon profana aŭ malpura; 29 tial, kiam mi estis
vokita, mi alvenis sen kontraŭdiro. Mi do demandas,
por kio vi min venigis? 30 Kaj Kornelio diris: Antaŭ
kvar tagoj ĝis ĉi tiu horo, mi preĝis la naŭahoran
preĝon en mia domo; kaj jen antaŭ mi staris viro hele
vestita, 31 kaj diris: Kornelio, via preĝo estas aŭdita,
kaj viaj almozoj estas memoritaj antaŭ Dio. 32 Sendu
do al Jafo, kaj invitu al vi Simonon, kiu estas alnomata
Petro; li gastas en la domo de Simon, tanisto, apud la
marbordo. 33 Tial mi tuj sendis al vi; kaj vi bone faris,
ke vi venis. Nun do ni ĉiuj alestas ĉi tie antaŭ Dio,
por aŭdi ĉion, kio estas ordonita al vi de la Sinjoro.
34 Kaj Petro malfermis sian buŝon, kaj diris: Vere mi
ekkomprenas, ke Dio ne privilegias personojn; 35
sed en ĉiu nacio tiu, kiu timas Lin kaj agas juste,
estas akceptata de Li. 36 Vi konas tiun vorton, kiun
Li sendis al la Izraelidoj, predikante la evangelion
de paco per Jesuo Kristo (li estas Sinjoro de ĉiuj); 37
vi konas tiun diron, kiu estas disvastigita tra la tuta
Judujo, komencante de Galileo, post la bapto, kiun
predikis Johano — 38 Jesuon, la Nazaretanon, kiun
Dio sanktoleis per la Sankta Spirito kaj potenco; li
ĉirkaŭiris, bonfarante kaj sanigante ĉiujn premegatajn
de la diablo, ĉar Dio estis kun li. 39 Kaj ni estas
atestantoj pri ĉio, kion li faris en la lando de la Judoj
kaj en Jerusalem; lin oni mortigis, pendigante lin sur
lignaĵo. 40 Lin Dio levis en la tria tago, kaj donis, ke li
estu videbla, 41 ne al la tuta popolo, sed al atestantoj,
kiuj estis elektitaj antaŭe de Dio, al ni, kiuj manĝis kaj
trinkis kun li post lia releviĝo el la mortintoj. 42 Kaj li
ordonis al ni prediki al la popolo, kaj atesti, ke li estas
la difinito de Dio, por esti la juĝisto de la vivantoj kaj
de la mortintoj. 43 Pri li ĉiuj profetoj atestas, ke per
lia nomo ĉiu kredanta al li ricevos pardonadon de
pekoj. 44 Dum Petro parolis tiujn vortojn, la Sankta
Spirito falis sur ĉiujn, kiuj aŭdis la diron. 45 Kaj ĉiuj el
la cirkumcido kredantoj, kiuj venis kun Petro, miregis
pri tio, ke ankaŭ sur la nacianojn estis surverŝata la
donaco de la Sankta Spirito. 46 Ĉar ili aŭdis ilin paroli
per lingvoj kaj glori Dion. Tiam respondis Petro: 47
Ĉu iu povas malpermesi la akvon, ke ne baptiĝu ĉi
tiuj, kiuj ricevis la Sanktan Spiriton tiel same, kiel
ni? 48 Kaj li ordonis, ke ili baptiĝu en la nomo de
Jesuo Kristo. Tiam ili petis, ke li restu ankoraŭ kelkajn
tagojn.

11 Kaj la apostoloj kaj la fratoj, kiuj estis en Judujo,
aŭdis, ke la nacianoj ankaŭ ricevis la vorton de
Dio. 2 Kaj kiam Petro venis al Jerusalem, tiuj, kiuj estis
el la cirkumcido, disputis kun li, 3 dirante: Vi eniris
al viroj ne cirkumciditaj, kaj manĝis kun ili. 4 Sed
Petro klarigis la aferon al ili orde, dirante: 5 Dum mi
preĝis en la urbo Jafo, en ekstazo mi vidis vizion, ujon
malsuprenirantan, kvazaŭ grandan tukon, mallevatan
el la ĉielo per la kvar anguloj; kaj ĝi venis ĝis mi; 6 kun
fiksa rigardo mi ĝin observis, kaj vidis kvarpiedajn
bestojn de la tero kaj sovaĝajn bestojn kaj rampaĵojn
kaj birdojn de la ĉielo. 7 Kaj mi aŭdis voĉon dirantan

al mi: Leviĝu, Petro; buĉu kaj manĝu. 8 Sed mi diris:
Ho ne, Sinjoro, ĉar nenio profana aŭ malpura eniris
iam en mian buŝon. 9 Sed voĉo respondis al mi la
duan fojon el la ĉielo: Kion Dio purigis, tion vi ne
nomu profana. 10 Ĉi tio fariĝis trifoje, kaj ĉio estis
retirata en la ĉielon. 11 Kaj jen antaŭ la domo, en kiu
mi estis, tuj staris tri viroj senditaj el Cezarea al mi.
12 Kaj la Spirito ordonis, ke mi iru kun ili, tute ne
hezitante. Kaj ĉi tiuj ses fratoj min akompanis, kaj ni
eniris en la domon de la viro; 13 kaj li diris al ni, ke li
vidis en sia domo la anĝelon starantan, kaj dirantan:
Sendu al Jafo, kaj venigu Simonon, kies alnomo estas
Petro, 14 kiu parolos al vi vortojn, per kiuj vi kaj via
tuta familio saviĝos. 15 Kaj dum mi komencis paroli,
la Sankta Spirito malsupreniris sur ilin tiel same, kiel
sur nin en la komenco. 16 Kaj mi rememoris la vorton
de la Sinjoro, ke li diris: Johano ja baptis per akvo; sed
vi baptiĝos per la Sankta Spirito. 17 Se do al ili Dio
donis la saman donacon, kiel al ni, kiam ni ekkredis al
la Sinjoro Jesuo Kristo, kia homo mi estis, ke mi povus
kontraŭstari al Dio? 18 Kiam ili tion aŭdis, ili silentiĝis,
kaj gloris Dion, dirante: Ankaŭ do al la nacianoj Dio
donacis penton por vivo. 19 Tiuj do, kiuj dispeliĝis
pro la suferado, kiu okazis pro Stefano, vojaĝis ĝis
Fenikio kaj Kipro kaj Antioĥia, priparolante la vorton
al neniu krom nur Judoj. 20 Sed iuj el ili, viroj el Kipro
kaj Kireno, veninte en Antioĥian, parolis al la Grekoj
ankaŭ, predikante la Sinjoron Jesuo. 21 Kaj la mano
de la Sinjoro estis kun ili; kaj granda nombro kredis
kaj turniĝis al la Sinjoro. 22 Kaj la raporto pri tio
estis aŭdita de la eklezio, kiu estis en Jerusalem; kaj
ili forsendis Barnabason ĝis Antioĥia; 23 li, veninte,
kaj vidante la gracon de Dio, ĝojis; kaj li admonis
ilin ĉiujn, ke kun korfirmeco ili restu fidelaj al la
Sinjoro; 24 ĉar li estis bona viro, kaj plena de la Sankta
Spirito kaj de fido; kaj multo da homoj aldoniĝis al
la Sinjoro. 25 Kaj li iris al Tarso, por serĉi Saŭlon;
26 kaj trovinte, li kondukis lin al Antioĥia. Kaj dum
tuta jaro ili kunvenadis kun la eklezio, kaj instruis
grandan aron da homoj; kaj en Antioĥia la disĉiploj
unue nomiĝis Kristanoj. 27 Kaj en tiuj tagoj profetoj
el Jerusalem vojaĝis al Antioĥia. 28 Kaj stariĝis unu
el ili, nomata Agabo, kaj deklaris per la Spirito, ke
estos granda malsato tra la tuta mondo; kaj tio okazis
en la tagoj de Klaŭdio. 29 Kaj la disĉiploj decidis, ke
ĉiu laŭ sia bonstato sendu helpon al la fratoj, kiuj
loĝis en Judujo; 30 tion ankaŭ ili faris, sendante al la
presbiteroj per la manoj de Barnabas kaj Saŭlo.

12 Kaj ĉirkaŭ tiu tempo la reĝo Herodo etendis siajn
manojn, por premi iujn el la eklezianoj. 2 Kaj li
mortigis per glavo Jakobon, la fraton de Johano. 3
Kaj vidinte, ke tio plaĉas al la Judoj, li plue aldonis la
areston de Petro. Kaj tiam estis la tagoj de macoj. 4 Kaj
kaptinte lin, li metis lin en malliberejon, transdonante
lin al kvar kvaroj da soldatoj, por gardi lin, intencante
elkonduki lin post la Pasko al la popolo. 5 Tial Petro
estis gardata en la malliberejo; sed preĝo por li estis
fervore farata de la eklezio al Dio. 6 Kaj kiam Herodo
intencis elkonduki lin, en tiu sama nokto Petro dormis
inter du soldatoj, ligite per du katenoj; kaj gardistoj
antaŭ la pordoj gardis la malliberejon. 7 Kaj jen
apudstaris anĝelo de la Eternulo, kaj lumo ekbrilis en
la ĉambro; kaj li frapis la flankon de Petro, kaj vekis
lin, dirante: Leviĝu rapide. Kaj liaj katenoj defalis de
liaj manoj. 8 Kaj la anĝelo diris al li: Zonu vin, kaj
alligu viajn sandalojn. Kaj li faris tion. Kaj li diris al li:
Ĵetu ĉirkaŭ vin vian mantelon kaj sekvu min. 9 Kaj li
eliris, kaj sekvis; kaj li ne sciis, ke reala estas tio, kion
faris la anĝelo, sed li pensis, ke li vidas vizion. 10 Kaj
trapasinte la unuan postenon kaj la duan, ili venis
al la fera pordego, kiu kondukas en la urbon; kaj ĝi
malfermiĝis al ili propramove; kaj ili eliris, kaj pasis
laŭlonge de unu strato; kaj la anĝelo tuj foriris de li.
11 Kaj Petro, rekonsciiĝinte, diris: Nun mi certe scias,
ke la Eternulo elsendis Sian anĝelon kaj liberigis min
el la mano de Herodo kaj el la tuta atendado de la
popolo Juda. 12 Kaj pripensinte, li venis al la domo
de Maria, la patrino de Johano, alnomata Marko, kie
estis multaj kunvenintaj kaj preĝantaj. 13 Kaj kiam
li frapis ĉe la pordo de la pordego, venis knabino
nomata Roda, por aŭskulti, 14 kaj rekonante la voĉon
de Petro, ŝi pro ĝojo ne malfermis la pordegon, sed
enkuris, kaj diris, ke Petro staras antaŭ la pordego. 15
Kaj oni diris al ŝi: Vi frenezas. Sed ŝi persiste certigis,
ke tiel estas. Kaj ili diris: Ĝi estas lia anĝelo. 16 Sed
Petro daŭrigis la frapadon; kaj ili, malferminte, vidis
lin, kaj miregis. 17 Sed li gestis per la mano, ke ili
silentu, kaj rakontis al ili, kiamaniere la Eternulo
elkondukis lin el la malliberejo. Kaj li diris: Sciigu
pri tio Jakobon kaj la fratojn. Kaj li foriris, kaj iris al
alia loko. 18 Kaj kiam tagiĝis, fariĝis inter la soldatoj
ne malgranda ekscitiĝo, kio fariĝis kun Petro. 19 Kaj

Herodo, serĉinte kaj ne trovinte lin, ekzamenis la
gardistojn, kaj ordonis forkonduki ilin al morto. Kaj
li vojaĝis el Judujo al Cezarea, kaj tie restis iom da
tempo. 20 Kaj li estis tre kolera kontraŭ la homoj
de Tiro kaj Cidon; kaj ili venis unuanime al li, kaj,
akirinte la favoron de Blasto, la reĝa ĉambelano, petis
pacon, ĉar ilia lando estis nutrata de la lando de la
reĝo. 21 Kaj en difinita tago Herodo, vestita en reĝaj
vestoj, sidis sur tribunala seĝo kaj deklamis al ili. 22
Kaj la popolo kriis: Ĝi estas voĉo de dio, kaj ne de
homo. 23 Kaj anĝelo de la Eternulo tuj frapis lin, pro
tio, ke li ne donis al Dio la gloron; kaj manĝate de
vermoj, li senspiriĝis. 24 Sed la vorto de Dio kreskis
kaj pligrandiĝis. 25 Kaj Barnabas kaj Saŭlo revenis de
Jerusalem, plenuminte sian servadon, kondukante
kun si Johanon, kiu estis alnomata Marko.

13 Kaj en Antioĥia, en la tiea eklezio, estis profetoj
kaj instruistoj, Barnabas, kaj Simeon, nomata
Niger, kaj Lucio, la Kirenano, kaj Manaen, kunvartito
de la tetrarĥo Herodo, kaj Saŭlo. 2 Kaj dum ili faris
servon al la Sinjoro kaj fastis, la Sankta Spirito diris:
Apartigu al mi Barnabason kaj Saŭlon por tiu laboro,
al kiu mi ilin vokis. 3 Tiam, fastinte kaj preĝinte kaj
metinte sur ilin la manojn, ili forsendis ilin. 4 Kaj ĉi
tiuj, forkondukite de la Sankta Spirito, malsupreniris
al Seleŭkia; kaj de tie ili ŝipiris al Kipro. 5 Kaj estante en
Salamis, ili proklamis la vorton de Dio en la sinagogoj
de la Judoj; kaj ili havis Johanon kiel helpanton.
6 Kaj trairinte la tutan insulon ĝis Pafos, ili trovis
unu magiiston, Judan falsan profeton, kies nomo
estis Bar-Jesuo, 7 kiu estis kun la prokonsulo Sergio
Paŭlo, prudenta viro. Ĉi tiu venigis al si Barnabason
kaj Saŭlon, kaj deziris aŭdi la vorton de Dio. 8 Sed
kontraŭstaris al ili Elimas, la magiisto (ĉar tion signifas
lia nomo), penante deturni la prokonsulon for de la
fido. 9 Sed Saŭlo, kiu estas Paŭlo, plenigite de la Sankta
Spirito kaj fikse rigardante lin, 10 diris: Ho vi, plena de
ĉia trompo kaj ruzemeco, filo de diablo, malamiko de
ĉia justeco, ĉu vi ne ĉesos defleksi la rektajn vojojn de
la Sinjoro? 11 Kaj nun jen la mano de la Sinjoro estas
sur vi, kaj vi estos blinda, ne vidante la sunon dum
kelka tempo. Kaj tuj falis sur lin nebulo kaj mallumo,
kaj ĉirkaŭvagante, li serĉis mankondukantojn. 12 Tiam
la prokonsulo, vidinte la okazintaĵon, kredis, mirigite
de la instruado de la Sinjoro. 13 Sed Paŭlo kaj liaj
akompanantoj ekŝipiris de Pafos kaj venis al Perga en
Pamfilio; kaj Johano forlasis ilin kaj reiris al Jerusalem.
14 Sed ili, trapasante de Perga venis al Antioĥia en
Pisidio; kaj en la sabato ili eniris en la sinagogon,
kaj sidiĝis. 15 Kaj post la legado de la leĝo kaj la
profetoj, la sinagogestroj sendis al ili, dirante: Fratoj,
se estas ĉe vi vorto de admono por la popolo, parolu.
16 Kaj Paŭlo, stariĝinte kaj gestinte per la mano, diris:
Izraelidoj, kaj vi, kiuj timas Dion, aŭskultu. 17 La Dio
de ĉi tiu popolo Izrael elektis niajn patrojn, kaj altigis
la popolon dum la loĝado en Egiptujo, kaj per alta
brako elkondukis ilin el tie. 18 Kaj en la daŭro de
ĉirkaŭ kvardek jaroj Li toleris ilian konduton en la
dezerto. 19 Kaj eksterminte sep naciojn en la lando
Kanaana, Li donis al ili ilian landon kiel heredon por
ĉirkaŭ kvarcent kvindek jaroj; 20 kaj post tio Li donis
juĝistojn ĝis la profeto Samuel. 21 Kaj poste ili petis
reĝon; kaj Dio donis al ili Saulon, filon de Kiŝ, viron
el la tribo de Benjamen, por kvardek jaroj. 22 Kaj
formetinte lin, Li levis al ili Davidon kiel reĝon, pri kiu
Li parolis, atestante: Mi trovis Davidon, filon de Jiŝaj,
viron laŭ Mia koro; li plenumos Mian tutan volon. 23
El lia idaro Dio laŭ promeso venigis al Izrael Savanton,
Jesuon, 24 kiam Johano jam predikis antaŭ lia alveno
la bapton de pento al la tuta popolo Izrael. 25 Kaj dum
Johano plenumis sian kuradon, li diris: Kiu vi supozas,
ke mi estas? mi ne estas tiu. Sed jen venas post mi
unu, al kiu mi ne estas inda malligi la sandalojn de
la piedoj. 26 Fratoj, idoj el la raso de Abraham, kaj
tiuj inter vi, kiuj timas Dion, al ni estas sendita la
vorto de ĉi tiu savo. 27 Ĉar la loĝantoj en Jerusalem
kaj iliaj regantoj ne konis lin; kaj kondamnante lin, ili
plenumis la voĉojn de la profetoj ĉiusabate legatajn.
28 Kaj trovinte en li nenian kaŭzon de morto, ili tamen
petis Pilaton mortigi lin. 29 Kaj plenuminte ĉion,
kio estis skribita pri li, ili forprenis lin de la lignaĵo
kaj metis lin en tombon. 30 Sed Dio levis lin el la
mortintoj; 31 kaj li estis vidata multajn tagojn de
tiuj, kiuj venis kun li el Galileo en Jerusalemon, kaj
ili nun estas liaj atestantoj ĉe la popolo. 32 Kaj ni
alportas al vi bonan sciigon pri la promeso farita al la
patroj, 33 ke Dio plenumis tion al ni, la filoj, relevinte
Jesuon, kiel ankaŭ estas skribite en la dua psalmo: Vi
estas Mia Filo, hodiaŭ Mi vin naskis. 34 Kaj pri tio,
ke Li relevis lin el la mortintoj, jam ne venontan en
forputron, Li parolis jene: Mi donos al vi la fidindajn
favorkoraĵojn de David. 35 Ĉar li ankaŭ diris en alia
psalmo: Vi ne permesos, ke Via sanktulo forputru.

36 Ĉar David, servinte en sia generacio al la intenco
de Dio, ekdormis, kaj alkolektiĝis al siaj patroj kaj
vidis forputron; 37 sed tiu, kiun Dio relevis, ne vidis
forputron. 38 Estu do sciate al vi, fratoj, ke per ĉi tiu
estas proklamata al vi pardonado de pekoj; 39 kaj ĉiu
kredanto al li estas pravigita pri ĉio, pri kio vi ne povis
esti pravigitaj per la leĝo de Moseo. 40 Gardu vin do,
ke ne venu sur vin tio, kio estas dirita en la profetoj:
41 Rigardu, vi malestimantoj, kaj miru, kaj malaperu,
Ĉar en via tempo Mi faras ion, Kion vi ne kredus, se
oni rakontus al vi. 42 Kaj dum ili eliris el la sinagogo,
oni petegis, ke ĉi tiuj vortoj estu parolataj al ili la
venontan sabaton. 43 Kaj kiam la sinagogo disiĝis,
multaj el la Judoj kaj el la piaj prozelitoj sekvis Paŭlon
kaj Barnabason, kiuj, alparolante ilin, urĝe admonis
ilin persisti en la graco de Dio. 44 En la sekvanta
sabato preskaŭ la tuta urbo kolektiĝis, por aŭdi la
vorton de Dio. 45 Kaj la Judoj, vidante la homamasojn,
pleniĝis de ĵaluzo, kaj kontraŭdiris la dirojn de Paŭlo,
kaj blasfemis. 46 Kaj Paŭlo kaj Barnabas, parolante
kuraĝe, diris: Estis necese paroli al vi unue la vorton
de Dio. Sed ĉar vi forpuŝis ĝin kaj ne juĝas vin indaj
je la eterna vivo, jen ni turnas nin al la nacianoj.
(aiōnios g166) 47 Ĉar tiel ordonis al ni la Sinjoro: Mi vin
metis kiel lumon por la nacioj, Por ke vi estu por
savo ĝis la plej malproksima parto de la tero. 48 Kaj
aŭdinte tion, la nacianoj ĝojis, kaj gloris la vorton de
Dio; kaj el ili kredis ĉiuj, kiuj estis difinitaj por eterna
vivo. (aiōnios g166) 49 Kaj la vorto de la Sinjoro estis
disportata tra la tuta regiono. 50 Sed la Judoj incitis la
piajn virinojn bonfamajn kaj la ĉefojn de la urbo, kaj
instigis persekutadon kontraŭ Paŭlo kaj Barnabas, kaj
forpelis ilin el siaj limoj. 51 Sed ili forskuis la polvon
de siaj piedoj kontraŭ ili, kaj iris al Ikonio. 52 Kaj la
disĉiploj pleniĝis de ĝojo kaj de la Sankta Spirito.

**14** Kaj en Ikonio ili ambaŭ eniris en la sinagogon de
la Judoj, kaj tiel parolis, ke granda amaso da Judoj
kaj Grekoj kredis. 2 Sed la nekredantaj Judoj ekscitis
kaj malbonigis la animojn de la nacianoj kontraŭ la
fratoj. 3 Tial ili restis longan tempon tie, sentime
parolante en la Sinjoro, kiu atestadis pri la vorto de
Sia graco, lasante, ke signoj kaj mirakloj fariĝu per
iliaj manoj. 4 Sed la loĝantaro de la urbo dividiĝis;
unuj estis kun la Judoj, kaj aliaj kun la apostoloj. 5
Kaj kiam fariĝis atenco de la nacianoj kaj ankaŭ de
la Judoj kun iliaj regantoj, por ataki kaj ŝtonmortigi
ilin, 6 sciiĝinte pri ĝi, ili forsavis sin en la urbojn de
Likaonio — Listran kaj Derben kaj la ĉirkaŭaĵon; 7 kaj
tie ili proklamis la evangelion. 8 Kaj en Listra sidadis
unu viro senforta en la piedoj, kiu estis lama de la
patrina ventro, kaj neniam piediris. 9 Li aŭdis Paŭlon
paroli; kaj ĉi tiu, fikse rigardante lin, kaj vidante, ke
ili havas fidon por esti sanigita, 10 diris per laŭta
voĉo: Stariĝu rekte sur viaj piedoj. Kaj li salte leviĝis
kaj piediris. 11 Kaj la homamaso, vidinte tion, kion
Paŭlo faris, levis sian voĉon, kaj diris en la Likaonia
lingvo: La dioj en homa formo malsupreniris al ni. 12
Kaj Barnabason ili nomis Zeŭs, kaj Paŭlon Hermes,
ĉar ĉi tiu estis la ĉefa parolanto. 13 Kaj la pastro de
la Zeŭs, kiu estis antaŭ la urbo, alkondukis bovojn
kaj girlandojn al la pordegoj, kaj volis oferi kun la
homamasoj. 14 Sed la apostoloj Paŭlo kaj Barnabas,
aŭdinte, disŝiris siajn vestojn, kaj antaŭensaltis en
la amason, kriante, 15 kaj dirante: Ho viroj, kial vi
tion faras? Ni ankaŭ estas homoj, samsentaj kiel vi,
kaj ni alportas al vi evangelion, por turni vin de ĉi
tiuj vantaĵoj al la vivanta Dio, kiu faris la ĉielon kaj
la teron kaj la maron kaj ĉion en ili; 16 kaj kiu en
la pasintaj generacioj permesis, ke ĉiuj nacioj iru
siajn proprajn vojojn. 17 Tamen Li ne lasis Sin sen
atesto, ĉar Li bonfaris, donante al vi pluvojn el la
ĉielo kaj fruktoportajn sezonojn, plenigante viajn
korojn per nutraĵo kaj feliĉo. 18 Kaj tiel dirante, ili
apenaŭ retenis la amasojn de oferado al ili. 19 Sed
alvenis Judoj el Antioĥia kaj Ikonio, kaj, instiginte la
amason, ili priĵetis Paŭlon per ŝtonoj, kaj trenis lin
ekster la urbon, pensante, ke li mortis. 20 Sed kiam
la disĉiploj staris ĉirkaŭ li, li leviĝis, kaj eniris en la
urbon; kaj en la sekvanta tago li eliris kun Barnabas al
Derbe. 21 Kaj proklaminte la evangelion al tiu urbo,
kaj varbinte multajn disĉiplojn, ili revenis al Listra
kaj Ikonio kaj Antioĥia, 22 firmigante la animojn de
la disĉiploj, kaj admonante, ke ili restu en la fido,
kaj ke tra multaj suferoj ni devas eniri en la regnon
de Dio. 23 Kaj elektinte presbiterojn por ili en ĉiu
eklezio, kaj preĝinte kun fastado, ili rekomendis ilin al
la Sinjoro, al kiu ili ekkredis. 24 Kaj trairinte Pisidion,
ili venis en Pamfilion. 25 Kaj parolinte la vorton en
Perga, ili malsupreniris al Atalia; 26 kaj de tie ili ŝipiris
al Antioĥia, de kie ili estis konfiditaj al la graco de
Dio por la laboro, kiun ili plenumis. 27 Kaj kiam ili
alvenis, ili kunvenigis la eklezion, kaj rakontis ĉion,
kion Dio per ili faris, kaj ke Li malfermis al la nacianoj

pordon de fido. 28 Kaj ili restis kelkan tempon kun la
disĉiploj.

15 Kaj iuj homoj vojaĝis tien el Judujo, kaj instruis
la fratojn: Se vi ne cirkumcidiĝos laŭ la moro
de Moseo, vi ne povas saviĝi. 2 Kaj kiam Paŭlo
kaj Barnabas havis ne malgrandan malkonsenton
kaj diskutadon kontraŭ ili, oni aranĝis, ke Paŭlo
kaj Barnabas kaj aliaj tieuloj iru Jerusalemon al
la apostoloj kaj presbiteroj pri tiu demando. 3 Ili
do, forkondukite de la eklezio, trairis Fenikion kaj
Samarion, anoncante la konvertadon de la nacianoj,
kaj faris grandan ĝojon al ĉiuj fratoj. 4 Kaj alveninte
en Jerusalemon, ili estis akceptitaj de la eklezio kaj
apostoloj kaj presbiteroj, kaj raportis ĉion, kion Dio
faris per ili. 5 Sed leviĝis iuj kredantoj el la sekto
de la Fariseoj, dirante: Estas necese cirkumcidi ilin,
kaj ordoni, ke ili observu la leĝon de Moseo. 6 Kaj
kunvenis la apostoloj kaj presbiteroj, por esplori tiun
aferon. 7 Kaj post multe da diskutado, Petro stariĝis,
kaj diris al ili: Fratoj, vi scias, ke jam antaŭ longe
Dio elektis min el inter vi, por ke per mia buŝo la
nacianoj aŭdu la vorton de la evangelio kaj kredu.
8 Kaj Dio, kiu konas la korojn, atestis al ili, donante
al ili la Sanktan Spiriton tiel same, kiel al ni; 9 kaj
Li faris nenian diferencon inter ni kaj ili, per la fido
puriginte iliajn korojn. 10 Nun do kial vi incitas Dion,
dezirante meti sur la kolon de la disĉiploj jugon,
kiun povis porti nek niaj patroj, nek ni? 11 Sed ni
kredas pri nia savo per la graco de la Sinjoro Jesuo
tiel same, kiel ankaŭ ili. 12 Kaj silentis la tuta amaso;
kaj ili aŭskultis, dum Paŭlo kaj Barnabas rakontis,
kiom da signoj kaj mirakloj Dio faris ĉe la nacianoj
per ili. 13 Kaj kiam ili ĉesis paroli, Jakobo respondis,
dirante: Fratoj, aŭskultu min; 14 Simeon rakontis, kiel
unue Dio vizitis nacianojn, por elekti el ili popolon
por Sia nomo. 15 Kaj al tio konsentas la vortoj de la
profetoj, kiel estas skribite: 16 Post tio Mi revenos,
Kaj Mi restarigos la falintan tabernaklon de David,
Mi restarigos la detruitaĵojn, Kaj Mi rekonstruos ĝin;
17 Por ke strebu al la Eternulo la ceteraj homoj Kaj
ĉiuj nacioj, inter kiuj estas proklamata Mia nomo,
Diras la Eternulo, 18 Kiu tion faras jam de la tempo
antikva. (aiōn g165) 19 Tial mi decidas, ke ni ne ĝenu
tiujn el la nacianoj, kiuj turniĝas al Dio; 20 sed ni
admonu ilin, ke ili detenu sin de malpuriĝoj ĉe idoloj
kaj de malĉasteco kaj de sufokitaĵoj kaj de sango. 21
Ĉar de post antikvaj generacioj Moseo havas en ĉiuj
urboj tiujn, kiuj lin predikas, legate en la sinagogoj
ĉiusabate. 22 Tiam al la apostoloj kaj presbiteroj kun
la tuta eklezio ŝajnis bone elekti virojn el inter si kaj
sendi ilin al Antioĥia kun Paŭlo kaj Barnabas: nome
Judas, alnomata Barsabas, kaj Silas, viroj konataj inter
la fratoj; 23 kaj ili sendis per ili la jenan leteron:
La apostoloj kaj presbiteroj, al la fratoj, kiuj estas
el la nacianoj en Antioĥia kaj Sirio kaj Kilikio, kun
saluto: 24 Ĉar ni aŭdis, ke iuj el ni ĝenis vin per vortoj
maltrankviligaj por viaj animoj, al kiuj ni ne ordonis
tion, 25 ŝajnis bone al ni unuanime, ke ni elektu virojn
kaj sendu ilin al vi kun niaj amataj Barnabas kaj
Paŭlo, 26 homoj, kiuj riskis siajn vivojn pro la nomo de
nia Sinjoro Jesuo Kristo. 27 Ni do sendis Judason kaj
Silason, kiuj ankaŭ mem buŝe diros tion saman. 28 Ĉar
al la Sankta Spirito kaj al ni ŝajnis bone meti sur vin
nenian alian ŝarĝon, krom la jenaj necesaj aferoj: 29
ke oni sin detenu de idoloferitaĵoj kaj de sango kaj de
sufokitaĵoj kaj de malĉasteco; se vi vin gardos kontraŭ
tio, vi bone agos. Adiaŭ! 30 Ili do, forsendite, iris al
Antioĥia; kaj kunveniginte la amason, ili transdonis
la leteron. 31 Kaj leginte ĝin, ili ĝojis pro la konsolo.
32 Kaj Judas kaj Silas, kiuj estis ankaŭ mem profetoj,
konsolis la fratojn per multe da parolo kaj firmigis
ilin. 33 Kaj pasiginte kelkan tempon, ili kun paco
foriris de la fratoj al siaj forsendintoj. 34 Tamen plaĉis
al Silas tie restadi.) 35 Sed Paŭlo kaj Barnabas restis
en Antioĥia, instruante kaj predikante, kun multaj
aliaj, la vorton de la Sinjoro. 36 Kaj post kelke da
tagoj Paŭlo diris al Barnabas: Ni reiru, kaj vizitu niajn
fratojn en ĉiu urbo, kie ni proklamis la vorton de
la Sinjoro, kaj vidu, kiel ili fartas. 37 Kaj Barnabas
konsilis kunpreni Johanon, alnomatan Marko. 38 Sed
Paŭlo ne aprobis kunpreni tiun, kiu sin fortiris de
ili en Pamfilio, kaj ne kuniris en la laboron. 39 Kaj
fariĝis disputo, tiel ke ili disiĝis unu de la alia; kaj
Barnabas, kunprenante Markon, ŝipiris al Kipro; 40
sed Paŭlo, elektinte Silason, foriris, konfidite de la
fratoj al la graco de Dio. 41 Kaj li iris tra Sirio kaj
Kilikio, firmigante la ekleziojn.

16 Kaj li venis al Derbe kaj Listra; kaj jen tie estis
unu disĉiplo, nomata Timoteo, filo de kredanta
Judino kaj de Greka patro. 2 Tiu estis bone atestata de
la fratoj en Listra kaj Ikonio. 3 Tiun Paŭlo deziris, ke li
foriru kun li, kaj li prenis kaj cirkumcidis lin pro la

Judoj, kiuj estis en tiuj regionoj; ĉar ĉiuj sciis, ke lia
patro estas Greko. 4 Kaj dum ili trapasis la urbojn, ili
transdonis al ili por observado la dekretojn, deciditajn
de la apostoloj kaj presbiteroj en Jerusalem. 5 Tiel
la eklezioj firmiĝis en la fido, kaj kreskis laŭnombre
ĉiutage. 6 Kaj ili trairis la Frigian kaj Galatujan
regionon, malpermesite de la Sankta Spirito priparoli
la vorton en Azio; 7 kaj veninte apud Misia, ili
klopodis eniri en Bitinion, kaj la Spirito de Jesuo
tion ne permesis al ili; 8 kaj pasinte preter Misia, ili
malsupreniris al Troas. 9 Kaj vizio aperis al Paŭlo
dum la nokto: viro Makedona staris, kaj petegis lin,
dirante: Transpasu al Makedonujo, kaj nin helpu. 10
Kaj post kiam li vidis la vizion, ni tuj penis foriri
en Makedonujon, konkludinte, ke Dio vokis nin, por
prediki al ili la evangelion. 11 Tial, ekŝipirinte de
Troas, ni rekte veturis al Samotrake, kaj la sekvantan
tagon al Neapolis; 12 kaj de tie al Filipi, kiu estas
kolonio, ĉefurbo de la Makedonuja provinco; kaj
en tiu urbo ni restis dum kelke da tagoj. 13 Kaj en
la sabato ni eliris ekster la pordegon apud rivero,
kie, ni supozis, estis kunvenejo por preĝado; kaj ni
sidiĝis, kaj parolis al la virinoj kunvenintaj. 14 Kaj
unu virino, nomata Lidia, vendistino de purpuro, el la
urbo Tiatira, adorantino de Dio, nin aŭdis; ŝian koron
la Sinjoro malfermis, por atenti la parolojn de Paŭlo.
15 Kaj kiam ŝi estis baptita, kun sia familio, ŝi nin
petegis, dirante: Se vi juĝas min fidela al la Sinjoro,
venu, kaj loĝu en mia domo. Kaj ŝi devigis nin. 16 Kaj
kiam ni iris al la kunvenejo por preĝado, renkontis nin
unu knabino, kiu havis orakolan spiriton kaj kiu per
aŭgurado alportadis al siaj mastroj multan gajnon.
17 Ŝi sekvis Paŭlon kaj nin, kaj kriadis, dirante: Tiuj
homoj estas servistoj de Dio la Plejalta, kiuj proklamas
al vi vojon de savo. 18 Kaj tion ŝi faris dum multe da
tagoj. Sed Paŭlo, ĉagrenite, turnis sin, kaj diris al la
spirito: Mi ordonas al vi en la nomo de Jesuo Kristo,
ke vi eliru el ŝi. Kaj ĝi eliris en tiu sama horo. 19 Sed
ŝiaj mastroj, vidinte, ke eliris la espero de ilia gajno,
kaptis Paŭlon kaj Silason, kaj trenis ilin en la placon
al la regantoj, 20 kaj kondukinte ilin al la urbestroj,
diris: Ĉi tiuj homoj treege maltrankviligas nian urbon,
estante Judoj, 21 kaj ili proklamas morojn, kiujn ne
decas akcepti nek fari por ni, kiuj estas Romanoj.
22 Kaj la popolo amase sin kolektis kontraŭ ili; kaj
la urbestroj, forŝirinte de ili la vestojn, ordonis, ke
oni vergobatu ilin. 23 Kaj metinte sur ilin multajn
batojn, ili ĵetis ilin en malliberejon, ordonante al la
estro de la malliberejo, ke li forte gardu ilin; 24 kaj
li, ricevinte tiun ordonon, ĵetis ilin en la internan
karceron kaj fiksis iliajn piedojn en la trabon. 25 Sed
ĉirkaŭ la noktomezo Paŭlo kaj Silas preĝis kaj himnis
al Dio, kaj la katenitoj aŭskultis ilin; 26 kaj subite
fariĝis granda tertremo, tiel ke la fundamentoj de la
malliberejo skuiĝis; kaj tuj ĉiuj pordoj malfermiĝis, kaj
ĉies katenoj falis. 27 Kaj la malliberejestro, vekiĝinte,
kaj vidante la pordojn de la karcero malfermitaj,
eltiris sian glavon kaj volis mortigi sin, supozante, ke
la malliberuloj forkuris. 28 Sed Paŭlo vokis per laŭta
voĉo, dirante: Nenian malbonon faru al vi, ĉar ni ĉiuj
estas ĉi tie. 29 Kaj veniginte lumilon, li ensaltis, kaj,
tremante de timo, kliniĝis antaŭ Paŭlo kaj Silas, 30
kaj kondukis ilin eksteren, kaj diris: Sinjoroj, kion mi
devas fari, por esti savita? 31 Kaj ili diris: Kredu al la
Sinjoro Jesuo, kaj vi estos savita, vi kaj via familio.
32 Kaj ili parolis la vorton de la Sinjoro al li kaj al
ĉiuj en lia domo. 33 Kaj li kondukis ilin en tiu sama
nokta horo kaj lavis al ili la batovundojn; kaj baptiĝis
senprokraste li kaj ĉiuj liaj domanoj. 34 Kaj li kondukis
ilin en sian domon, kaj aranĝis por ili manĝotablon,
kaj tre ĝojis kun sia tuta domanaro, ekkredinte al Dio.
35 Sed kiam tagiĝis, la urbestroj sendis la liktorojn, por
diri: Forliberigu tiujn homojn. 36 Kaj la malliberejestro
raportis la vortojn al Paŭlo: La urbestroj ĵus sendis,
por ke vi forliberiĝu; tial nun elvenu kaj foriru pace.
37 Sed Paŭlo diris al ili: Ili publike vergobatis nin ne
kondamnitajn, kvankam ni estas Romanoj, kaj nin
ĵetis en malliberejon; kaj ĉu ili nun elĵetas nin kaŝe?
tute ne; ili mem venu kaj forkonduku nin. 38 Kaj la
liktoroj raportis tiujn vortojn al la urbestroj; kaj ĉi tiuj
timis, aŭdante, ke ili estas Romanoj; 39 kaj ili venis kaj
petegis ilin, kaj, elkondukinte ilin, petis, ke ili foriru
de la urbo. 40 Kaj ili eliris el la malliberejo, kaj eniris
en la domon de Lidia; kaj vidinte kaj konsolinte la
fratojn, ili foriris.

17 Kaj vojaĝinte tra Amfipolis kaj Apolonia, ili
alvenis en Tesalonikon, kie estis sinagogo de la
Judoj; 2 kaj laŭ sia kutimo Paŭlo eniris al ili, kaj dum
tri sabatoj li rezonadis kun ili el la Skriboj, 3 klarigante
kaj montrante, ke la Kristo devis suferi kaj releviĝi el
la mortintoj, kaj dirante: Ĉi tiu Jesuo, kiun mi predikas
al vi, estas la Kristo. 4 Kaj unuj el ili estis konvinkitaj,
kaj kunsortiĝis kun Paŭlo kaj Silas; kaj el la piaj Grekoj

granda amaso, kaj el la ĉefaj virinoj ne malmultaj. 5
Sed la Judoj, enviante, varbis kelkajn malnoblulojn el
la popolaĉo, kaj, kolektinte homamason, entumultigis
la urbon; kaj atakinte la domon de Jason, ili klopodis
elkonduki ilin al la popolo. 6 Sed ne trovinte ilin, ili
trenis Jasonon kaj kelkajn fratojn antaŭ la urbestrojn,
kriante: Tiuj samaj, kiuj renversis la tutan mondon,
alestas ankaŭ ĉi tie; 7 ilin Jason akceptis; kaj ili ĉiuj
agas kontraŭ la dekretoj de Cezaro, dirante, ke estas
alia reĝo, Jesuo. 8 Kaj ili maltrankviligis la homamason
kaj la urbestrojn, kiuj tion aŭdis. 9 Kaj ĉi tiuj, ricevinte
garantiaĵon de Jason kaj la aliaj, liberigis ilin. 10 Kaj la
fratoj tuj forsendis Paŭlon kaj Silason nokte al Berea;
kaj alveninte tien, ili iris en la sinagogon de la Judoj.
11 Kaj ĉi tiuj estis pli noblaj ol la Tesalonikanoj, ĉar
ili akceptis la vorton kun plena fervoro, kaj ĉiutage
esploris la Skribojn, por konstati, ĉu tiuj aferoj estas
veraj. 12 Tial multaj el ili kredis, kaj ne malmultaj el la
Grekaj virinoj honorindaj kaj el la viroj. 13 Sed kiam la
Judoj en Tesaloniko sciiĝis, ke ankaŭ en Berea la vorto
de Dio estas proklamita de Paŭlo, ili venis ankaŭ tien,
maltrankviligante kaj ekscitante la homamason. 14
Kaj tiam la fratoj tuj forsendis Paŭlon, por ke li iru ĝis
la marbordo; sed Silas kaj Timoteo restis ankoraŭ tie.
15 Kaj la gvidantoj de Paŭlo kondukis lin ĝis Ateno, kaj
ricevinte komision al Silas kaj Timoteo, ke ili venu al
li kiel eble plej rapide, ili foriris. 16 Kaj dum Paŭlo
atendis ilin en Ateno, lia spirito ĉagreniĝis en li, kiam
li vidis la urbon idolplena. 17 Tial li rezonadis en
la sinagogoj kun la Judoj kaj la diotimantoj, kaj sur
la placo ĉiutage kun la renkontitoj. 18 Kaj iuj el la
Epikuranaj kaj Stoikaj filozofoj lin renkontis. Kaj unuj
diris: Kion volus diri ĉi tiu vortŝutanto? aliaj diris:
Li ŝajnas esti proklamanto de fremdaj diaĵoj; ĉar li
predikis Jesuon kaj la releviĝon. 19 Kaj ili prenis lin,
kaj kondukis lin al la Areopago, dirante: Ĉu ni povas
scii, kio estas tiu nova instruo, priparolata de vi? 20
Ĉar fremdaĵojn vi portas al niaj oreloj; ni do volas
scii, kion signifas tiuj aferoj. 21 (Ĉiuj Atenanoj kaj la
tie loĝantaj fremduloj pasigadis la tempon ĉe nenio
alia, krom diri aŭ aŭdi ion plej novan.) 22 Kaj Paŭlo
staris meze de la Areopago, kaj diris: Atenanoj, mi
rimarkas, ke vi estas ĉiurilate tro servemaj al diaĵoj.
23 Ĉar preterpasante kaj rigardante viajn adorataĵojn,
mi trovis ankaŭ altaron, sur kiu estis skribite: AL
DIO NEKONATA. Kiun do vi nekonante adoras, Tiun
mi predikas al vi. 24 La Dio, kiu faris la mondon kaj
ĉion, kio estas en ĝi, estante per Si mem Sinjoro de la
ĉielo kaj la tero, ne loĝas en manfaritaj temploj; 25
kaj ne estas servata de homaj manoj, kvazaŭ Li ion
bezonus, ĉar Li mem donas al ĉiuj vivon kaj spiron kaj
ĉion; 26 kaj el unu origino Li faris ĉiujn naciojn de la
homoj, por loĝi sur la tuta supraĵo de la tero, difininte
ordigitajn epokojn kaj la limojn de iliaj loĝejoj; 27
por ke ili serĉu Dion, se eble ili povus ĉirkaŭpalpi kaj
trovi Lin, kvankam Li ne estas malproksime de ĉiu
el ni; 28 ĉar en Li ni vivas kaj moviĝas kaj ekzistas,
kiel ankaŭ iuj viaj poetoj diris: Ĉar ni estas ankaŭ
Lia idaro. 29 Tial ni, estante idaro de Dio, devas ne
opinii la Diecon simila al oro aŭ arĝento aŭ ŝtono,
gravuraĵo de homa arto kaj imagado. 30 Kaj la tempojn
de nesciado preterrigardis Dio, sed nun Li proklamas
al ĉiuj homoj, ke ili pentu; 31 tial Li difinis tagon, en
kiu Li juĝos la mondon en justeco per tiu viro, kiun Li
elektis, doninte garantion pri tio al ĉiuj homoj per
tio, ke Li relevis lin el la mortintoj. 32 Kaj aŭdinte pri
releviĝo de la mortintoj, unuj mokis; sed aliaj diris: Ni
aŭskultos vin denove pri tio. 33 Kaj tiel Paŭlo eliris el
inter ili. 34 Sed iuj viroj aliĝis al li kaj kredis, inter
kiuj estis Dionisio, Areopagano, kaj virino, nomata
Damaris, kaj aliaj kun ili.

18 Post tio li foriris el Ateno kaj alvenis en Korinton.
2 Kaj li trovis Judon, nomatan Akvila, Pontanon
laŭ gento, antaŭ ne longe venintan el Italujo, kaj
Priskilan, lian edzinon, ĉar Klaŭdio jam ordonis, ke
ĉiuj Judoj foriru el Romo; kaj li iris al ili; 3 kaj, ĉar
li estis sammetiisto, li loĝis ĉe ili, kaj ili laboris, ĉar
ili estis laŭ metio tendofaristoj. 4 Kaj li diskutadis
en la sinagogo ĉiusabate, kaj penis konvinki Judojn
kaj Grekojn. 5 Kiam do Silas kaj Timoteo alvenis el
Makedonujo, Paŭlo estis premata per la predikado,
atestante al la Judoj, ke Jesuo estas la Kristo. 6 Sed
kiam ili kontraŭstaris kaj blasfemis, li elskuis siajn
vestojn, kaj diris al ili: Via sango estu sur viaj kapoj;
mi estas pura; de nun mi iros al la nacianoj. 7 Kaj
foririnte de tie, li iris en la domon de homo nomata
Tito Justo, kiu adoris Dion, kaj kies domo estis tuj
apud la sinagogo. 8 Kaj Krispo, la sinagogestro, kredis
al la Sinjoro kune kun ĉiuj siaj domanoj; kaj multaj
Korintanoj, aŭdinte, kredis kaj baptiĝis. 9 Kaj la
Sinjoro diris per vizio nokte al Paŭlo: Ne timu, sed
parolu, kaj ne silentu; 10 ĉar mi estas kun vi, kaj neniu
vin atakos, por fari al vi malbonon; ĉar mi havas

multe da homoj en ĉi tiu urbo. 11 Kaj li loĝis tie jaron
kaj ses monatojn, instruante inter ili la vorton de
Dio. 12 Sed kiam Galiono estis prokonsulo de la Aĥaja
lando, la Judoj leviĝis unuanime kontraŭ Paŭlo, kaj
kondukis lin al la tribunala seĝo, 13 dirante: Kontraŭ
la leĝo ĉi tiu instigas homojn adori Dion. 14 Sed kiam
Paŭlo estis malfermonta la buŝon, Galiono diris al la
Judoj: Se vere tio estus ia maljustaĵo aŭ malbonega
kanajlaĵo, ho Judoj, estus racie, ke mi vin toleru; 15
sed se prezentiĝas demandoj pri vortoj kaj nomoj kaj
via propra leĝo, vi mem ĝin atentu; pri tiaj aferoj
mi ne volas esti juĝanto. 16 Kaj li forpelis ilin de la
tribunala seĝo. 17 Kaj ili ĉiuj ekkaptis Sosteneson,
la sinagogestron, kaj batis lin antaŭ la tribunala
seĝo. Kaj Galiono atentis nenion el tio. 18 Kaj Paŭlo,
restinte post tio ankoraŭ dum multe da tagoj, adiaŭis
la fratojn, kaj de tie ŝipiris al Sirio, kaj kun li Priskila
kaj Akvila; sed li razis sian kapon en Kenkrea, ĉar li
faris sanktan promeson. 19 Kaj ili alvenis en Efeson,
kaj li lasis ilin tie; sed li mem eniris en la sinagogon,
kaj diskutis kun la Judoj. 20 Kaj kiam ili petis lin
restadi pli longe, li ne konsentis; 21 sed adiaŭinte ilin,
kaj dirinte: Mi denove revenos al vi, se plaĉos al Dio —
li ekŝipiris el Efeso. 22 Kaj elŝipiĝinte en Cezarea, li
supreniris kaj salutis la eklezion, kaj poste vojaĝis al
Antioĥia. 23 Kaj pasiginte iom da tempo tie, li foriris,
kaj trapasis laŭvice la Galatujan kaj Frigian regionon,
fortikigante ĉiujn disĉiplojn. 24 Kaj unu Judo, nomata
Apolos, Aleksandriano laŭ gento, viro klera, venis al
Efeso; kaj li estis potenca en la Skriboj. 25 Ĉi tiu jam
estis instruita pri la vojo de la Sinjoro; kaj estante
fervora en spirito, li paroladis kaj instruadis precize
pri Jesuo, konante nur la bapton de Johano; 26 kaj li
komencis paroli sentime en la sinagogo. Sed Akvila
kaj Priskila, aŭdinte lin, alprenis lin al si, kaj klarigis
al li pli precize la vojon de Dio. 27 Kaj kiam li volis
transiri en la Aĥajan landon, la fratoj kuraĝigis lin, kaj
skribis al la disĉiploj, ke ili akceptu lin; kaj alveninte,
li multe helpis tiujn, kiuj kredis per graco; 28 ĉar
konvinke li refutis la Judojn publike, pruvante per la
Skriboj, ke Jesuo estas la Kristo.

**19** Kaj dum Apolos estis en Korinto, Paŭlo, trapasinte
la supran regionon, venis al Efeso, kaj trovinte
iujn disĉiplojn, 2 li diris al ili: Ĉu vi ricevis la Sanktan
Spiriton, kiam vi ekkredis? Kaj ili diris al li: Ni ankoraŭ
eĉ ne aŭdis, ĉu estas Sankta Spirito. 3 Kaj li diris al
ili: En kion do vi baptiĝis? Kaj ili diris: En la bapton
de Johano. 4 Kaj Paŭlo diris: Johano baptis per la
bapto de pento, dirante al la popolo, ke ili kredu al
tiu, kiu venos post li, tio estas al Jesuo. 5 Kaj tion
aŭdinte, ili baptiĝis en la nomon de la Sinjoro Jesuo. 6
Kaj kiam Paŭlo metis siajn manojn sur ilin, la Sankta
Spirito venis sur ilin; kaj ili ekparolis per lingvoj kaj
ekprofetis. 7 Kaj ili ĉiuj estis ĉirkaŭ dek du viroj. 8 Kaj
li eniris en la sinagogon, kaj parolis sentime en la
daŭro de tri monatoj, diskutante kaj rezonante rilate
la regnon de Dio. 9 Sed kiam kelkaj obstiniĝis kaj
malobeis, kalumniante la Vojon antaŭ la homamaso,
li foriris de ili, kaj forigis la disĉiplojn, kaj diskutis
ĉiutage en la lernejo de Tiranos. 10 Kaj tio daŭris
dum du jaroj; tiel ke ĉiuj loĝantoj en Azio, Judoj kaj
Grekoj, aŭdis la vorton de la Sinjoro. 11 Kaj Dio faris
per la manoj de Paŭlo eksterordinarajn miraklojn;
12 tiel ke al la malsanuloj oni alportis de lia korpo
viŝtukojn aŭ vestotukojn, kaj la malsanoj forlasis ilin,
kaj la malbonaj spiritoj eliris. 13 Sed ankaŭ kelkaj
el la vagemaj Judoj, ekzorcistoj, entreprenis nomi
super tiuj, kiuj havis la malbonajn spiritojn, la nomon
de la Sinjoro Jesuo, dirante: Mi ekzorcas vin per
Jesuo, kiun Paŭlo predikas. 14 Kaj sep filoj de unu
Judo, Skeva, ĉefpastro, tion faris. 15 Kaj la malbona
spirito responde diris al ili: Jesuon mi konas, kaj
Paŭlon mi konas; sed kiuj estas vi? 16 Kaj la viro,
en kiu estis la malbona spirito, sin ĵetis sur ilin, kaj
venkis kaj superfortis ilin, tiel ke ili forkuris el tiu
domo nudaj kaj vunditaj. 17 Kaj tio sciiĝis al ĉiuj,
kiuj loĝis en Efeso, Judoj kaj Grekoj; kaj timo falis sur
ilin ĉiujn, kaj la nomo de la Sinjoro Jesuo grandiĝis.
18 Multaj ankaŭ el la kredantoj venis, kaj konfesis,
montrante siajn agojn. 19 Kaj ne malmultaj el tiuj, kiuj
praktikis magiajn artojn, alportis amase siajn librojn,
kaj bruligis ilin antaŭ la okuloj de ĉiuj; kaj oni kalkulis
ilian valoron, kaj trovis ĝin kvindek miloj da moneroj
arĝentaj. 20 Tiel forte kreskis la vorto de la Sinjoro kaj
sukcesis. 21 Kaj kiam tio finiĝis, Paŭlo intencis en la
spirito, trapasinte Makedonujon kaj la Aĥajan landon,
vojaĝi al Jerusalem, kaj li diris: Post kiam mi iros
tien, mi devos ankaŭ vidi Romon. 22 Kaj sendinte en
Makedonujon du el siaj helpservantoj, Timoteon kaj
Eraston, li mem restis iom da tempo en Azio. 23 Kaj
ĉirkaŭ tiu tempo leviĝis ne malgranda ekscitiĝo pri la
Vojo. 24 Ĉar unu viro, nomata Demetrio, arĝentaĵisto,
kiu faradis arĝentajn templetojn de Artemis, liveris al

la metiistoj multe da okupo; 25 kaj li kunvenigis ilin,
kune kun la samokupaj laboristoj, kaj diris: Ho viroj,
vi scias, ke per ĉi tiu metio ni havas bonajn enspezojn.
26 Kaj vi vidas kaj aŭdas, ke ne sole en Efeso, sed ankaŭ
tra preskaŭ la tuta Azio, ĉi tiu Paŭlo jam influis kaj
forturnis multe da homoj, dirante, ke tio, kio estas
manfarita, estas ne-dioj; 27 kaj estas danĝero, ne sole
ke ĉi tiu nia metio estos malestimata, sed ankaŭ ke la
templo de la granda diino Artemis estos malŝatata; kaj
eble estos senigita je sia majesto tiu, kiun la tuta Azio
kaj la tuta mondo adoras. 28 Aŭdinte tion, ili pleniĝis
de kolero, kaj ekkriis, dirante: Granda estas Artemis de
la Efesanoj. 29 Kaj la urbo pleniĝis de tumulto; kaj oni
kure kolektiĝis unuanime en la teatron, ekkaptinte
Gajon kaj Aristarĥon, Makedonojn, kunvojaĝantojn de
Paŭlo. 30 Kaj kiam Paŭlo volis eniri antaŭ la popolon,
la disĉiploj tion ne permesis al li. 31 Kaj ankaŭ kelkaj
el la ĉefoj de Azio, kiuj estis liaj amikoj, sendis al li, kaj
petegis lin ne riski sin en la teatron. 32 Kriadis ili do
diverse ion kaj alion, ĉar la kunveno estis konfuzita;
kaj la plimulto ne sciis, kial ili kunvenis. 33 Kaj el la
homamaso ili elpaŝigis Aleksandron, kiun la Judoj
puŝis antaŭen. Kaj Aleksandro gestis per la mano, kaj
ekprovis pledi antaŭ la popolo. 34 Sed sciiĝinte, ke
li estas Judo, ĉiuj unuvoĉe en la daŭro de ĉirkaŭ du
horoj kriadis: Granda estas Artemis de la Efesanoj! 35
Kaj kiam la urboskribisto kvietigis la amason, li diris:
Ho Efesanoj, ĉu do ekzistas homo nescianta, ke la urbo
de la Efesanoj estas templogardanto de Artemis la
granda kaj de la elĉiela falintaĵo? 36 Ĉar tio do ne estas
kontraŭdirebla, vi devas esti trankvilaj, kaj fari nenion
senpripense. 37 Ĉar vi alkondukis ĉi tiujn virojn, kiuj
estas nek templorabistoj nek blasfemantoj de nia
diino. 38 Se do Demetrio kaj la kun li metiistoj havas
plendaferon kontraŭ iu, la juĝejoj estas je ilia dispono,
kaj ekzistas prokonsuloj; ili procesu unu kontraŭ alia.
39 Sed se vi faras esploron pri io alia, tio decidiĝos
en la laŭleĝa kunveno. 40 Ĉar estas danĝero, ke oni
akuzos nin pri tumulto rilate la hodiaŭan aferon, pro
manko de motivo; kaj rilate ĝin, ni ne povos pravigi ĉi
tiun homamasiĝon. 41 Kaj tion dirinte, li dissendis la
kunvenintojn.

**20** Kaj kiam la tumulto ĉesiĝis, Paŭlo, veniginte
al si kaj admoninte la disĉiplojn, adiaŭis ilin,
kaj foriris, por iri en Makedonujon. 2 Kaj trairinte
tiujn regionojn, kaj per multaj paroloj kuraĝiginte la
tieulojn, li venis en Grekujon. 3 Kaj pasiginte tie tri
monatojn, post konspiro farita de la Judoj kontraŭ
li, kiam li volis ŝipiri al Sirio, li decidis reveni tra
Makedonujo. 4 Kaj ĝis Azio akompanis lin Sopater el
Berea, la filo de Pirho; kaj el la Tesalonikanoj, Aristarĥo
kaj Sekundo; kaj Gajo el Derbe, kaj Timoteo; kaj Tiĥiko
kaj Trofimo, Azianoj. 5 Sed ĉi tiuj, antaŭirinte, atendis
nin en Troas. 6 Kaj ni ŝipiris de Filipi post la tagoj
de macoj, kaj alvenis al ili en Troas post kvin tagoj,
kaj tie ni restis sep tagojn. 7 Kaj en la unua tago de
la semajno, kiam ni kunvenis, por dispecigi panon,
Paŭlo paroladis al ili, intencante foriri en la sekvanta
tago; kaj li daŭrigis sian paroladon ĝis noktomezo. 8
Kaj estis multaj lumiloj en la supra ĉambro, kie ni
kunvenis. 9 Kaj sur la fenestro sidis junulo, nomata
Eŭtiĥo, premegata de profunda dormo; kaj dum
Paŭlo ankoraŭ longe paroladis, tiu, venkite de la
dormo, falis malsupren de la tria etaĝo, kaj estis levita
malviva. 10 Kaj Paŭlo malsupreniris, kaj falis sur lin,
kaj ĉirkaŭpreninte lin, diris: Ne maltrankviliĝu; ĉar lia
vivo estas en li. 11 Kaj supreniririnte, kaj dispeciginte la
panon, kaj manĝinte, kaj parolinte kun ili longe, ĝis la
tagiĝo, fine li foriris. 12 Kaj ili alkondukis la knabon
vivantan, kaj multe konsoliĝis. 13 Sed ni, irinte pli
frue al la ŝipo, ekveturis al Asos, por tie enŝipigi
Paŭlon; ĉar tiel li aranĝis, intencante mem piediri. 14
Kaj kiam li renkontis nin en Asos, ni enŝipigis lin, kaj
venis al Mitilene. 15 Kaj de tie ŝipirinte, ni alvenis
la sekvantan tagon kontraŭ Ĥios; kaj la duan tagon
ni atingis Samoson; kaj la trian tagon ni alvenis en
Mileton. 16 Ĉar Paŭlo decidis preterveturi Efeson,
por ne perdi tempon en Azio; ĉar li rapidis, por esti
en Jerusalem, se li nur povos, en la Pentekosta tago.
17 Kaj de Mileto li sendis al Efeso, kaj alvokis al si
la presbiterojn de la eklezio. 18 Kaj kiam ili alvenis,
li diris al ili: Vi mem scias de post la tago, kiam mi
unue enpaŝis en Azion, kiamaniere mi kondutis inter
vi dum la tuta tempo, 19 servante la Sinjoron kun
ĉia humileco, kaj ĉe larmoj kaj ĉe tentoj, kiuj okazis
al mi per la konspiroj de la Judoj; 20 kaj ke mi ne
hezitis deklari al vi ĉion utilan, instruante vin publike,
kaj de domo al domo, 21 ateston farante al Judoj kaj
Grekoj pri pento antaŭ Dio kaj pri fido al nia Sinjoro
Jesuo Kristo. 22 Kaj nun jen, enkatenite en spirito,
mi iras al Jerusalem, ne sciante, kio okazos al mi tie,
23 krom tio, ke la Sankta Spirito atestas al mi en ĉiu
urbo, dirante, ke katenoj kaj afliktoj min atendas. 24

Sed mi taksas je nenio mian vivon kiel al mi mem
karan, se nur mi povos plenumi mian kuradon, kaj la
komision, kiun mi ricevis de la Sinjoro Jesuo, atesti la
evangelion de la graco de Dio. 25 Kaj nun jen mi scias,
ke vi ĉiuj, inter kiuj mi iradis, predikante la regnon,
ne plu vidos mian vizaĝon. 26 Tial mi atestas al vi
hodiaŭ, ke mi estas pura pri la sango de ĉiuj homoj.
27 Ĉar mi ne hezitis anonci al vi la tutan intencon de
Dio. 28 Gardu vin kaj la tutan gregon, en kiu la Sankta
Spirito faris vin episkopoj, por nutri la eklezion de
Dio, kiun li aĉetis per sia propra sango. 29 Mi scias,
ke post mia foriro eniros inter vi kruelaj lupoj, ne
lasante la gregon sendifekta; 30 kaj eĉ el inter vi mem
leviĝos viroj perverse parolantaj, por forlogi post si
la disĉiplojn. 31 Tial gardu vin, memorante, ke dum
tri jaroj mi ne ĉesis admoni ĉiun nokte kaj tage kun
larmoj. 32 Kaj nun mi vin rekomendas al Dio kaj al la
vorto de Lia graco, kiu povas vin edifi kaj doni al vi la
heredon inter ĉiuj sanktigitoj. 33 Mi ne deziras ies
arĝenton, nek oron, nek vestaron. 34 Vi mem scias,
ke ĉi tiuj manoj servadis al miaj bezonoj kaj al miaj
kunuloj. 35 En ĉio mi montris al vi, ke tiel laborante,
vi devas helpi la malfortulojn, kaj memori la vortojn
de la Sinjoro Jesuo, kiujn li mem diris: Pli feliĉe estas
doni, ol ricevi. 36 Kaj tiel dirinte, li genuiĝis, kaj preĝis
kun ili ĉiuj. 37 Kaj ĉiuj ploregis, kaj falis sur la kolon
de Paŭlo kaj lin kisis, 38 malĝojante precipe pro la
vorto, kiun li diris, ke ili ne plu vidos lian vizaĝon. Kaj
ili akompanis lin ĝis la ŝipo.

21 Kaj kiam ni, apartiĝinte de ili, ekŝipiris, ni rekte
veturis al Kos, kaj en la sekvanta tago al Rodo,
kaj de tie al Patara; 2 kaj trovinte ŝipon transirontan
al Fenikio, ni enŝipiĝis kaj ekveturis. 3 Kaj ekvidinte
Kipron kaj lasinte ĝin maldekstre, ni veturis al Sirio,
kaj elŝipiĝis en Tiro; ĉar tie la ŝipo devis senŝarĝiĝi.
4 Kaj trovinte la disĉiplojn, ni restis tie sep tagojn;
kaj tiuj diris al Paŭlo per la Spirito, ke li ne aliru
Jerusalemon. 5 Kaj pasiginte la tagojn, ni eliris kaj
ekvojaĝis; kaj ili ĉiuj kune kun edzinoj kaj infanoj
akompanis nin ĝis ekster la urbo; kaj genuiĝinte sur
la marbordo, ni preĝis; 6 kaj adiaŭinte unuj aliajn, ni
enŝipiĝis, kaj ili returne iris hejmen. 7 Kaj fininte la
marvojaĝon de Tiro, ni alvenis ĉe Ptolemais; kaj ni
salutis la fratojn, kaj restis kun ili unu tagon. 8 Kaj en
la sekvanta tago ni foriris, kaj alvenis en Cezarean; kaj
enirinte en la domon de la evangeliisto Filipo, kiu
estis unu el la sepo, ni restis ĉe li. 9 Ĉi tiu havis kvar
filinojn virgulinojn, kiuj profetadis. 10 Kaj dum ni
restis tie ankoraŭ dum kelke da tagoj, unu profeto,
nomata Agabo, alvojaĝis el Judujo. 11 Kaj veninte al
ni, li prenis la zonon de Paŭlo, kaj ligis siajn piedojn
kaj manojn, kaj diris: Tiele diras la Sankta Spirito:
Tiamaniere la Judoj en Jerusalem ligos la viron, kies
estas ĉi tiu zono, kaj ili transdonos lin en la manojn
de la nacianoj. 12 Kaj aŭdinte tion, ni kaj la tieuloj
petis lin, ke li ne aliru Jerusalemon. 13 Sed Paŭlo
respondis: Kion vi faras, plorante kaj dispremante
mian koron? ĉar mi estas preta ne nur esti ligita, sed
ankaŭ morti en Jerusalem pro la nomo de la Sinjoro
Jesuo. 14 Kaj kiam li ne konsentis, ni silentis, dirante:
Plenumiĝu la volo de la Sinjoro. 15 Kaj post tiuj tagoj
ni pretigis niajn pakaĵojn, kaj supreniris al Jerusalem.
16 Kaj iris ankaŭ kun ni kelkaj el la disĉiploj el Cezarea,
kunkondukante Mnasonon, Kipranon, unuatempan
disĉiplon, ĉe kiu ni devis loĝadi. 17 Kaj kiam ni alvenis
en Jerusalemon, la fratoj nin ĝoje akceptis. 18 Kaj la
sekvantan tagon Paŭlo akompanis nin al Jakobo, kaj
ĉiuj presbiteroj ĉeestis. 19 Kaj salutinte ilin, li rakontis
detale ĉion, kion Dio faris inter la nacianoj per lia
servado. 20 Kaj tion aŭdinte, ili gloris Dion; kaj ili diris
al li: Vi vidas, frato, kiom da miloj da kredantoj estas
el inter la Judoj, kaj ili ĉiuj estas fervoruloj por la leĝo;
21 kaj oni raportis al ili pri vi, ke vi instruas ĉiujn
Judojn, kiuj estas inter la nacianoj, forlasi Moseon,
dirante, ke ili ne cirkumcidu la infanojn, nek sekvu
la kutimojn. 22 Kio do estas? nepre ili aŭdos, ke vi
venis. 23 Faru do tion, kion ni diras al vi: Ni havas
kvar virojn, kiuj faris sanktan promeson; 24 prenu ĉi
tiujn, sanktigu vin kun ili, kaj pagu iliajn elspezojn,
por ke ili razu sian kapon; kaj ĉiuj scios, ke nenia
vero estas en tio, kion oni raportis pri vi, sed ke vi
mem ankaŭ iradas orde, observante la leĝon. 25 Sed
koncerne la nacianojn, kiuj ekkredis, ni jam skribis,
decidante, ke ili gardu sin kontraŭ idoloferitaĵoj kaj
sango kaj sufokitaĵo kaj malĉasteco. 26 Tiam Paŭlo
alprenis al si la virojn, kaj, sanktiginte sin kun ili, en
la sekvanta tago li eniris en la templon, kaj deklaris la
plenumon de la tagoj de la purigado, ĝis la oferaĵo
estos alportita por ĉiu el ili. 27 Kaj kiam la sep tagoj
preskaŭ finiĝis, la Judoj el Azio, vidinte lin en la
templo, incitis la tutan homamason, kaj lin kaptis, 28
ekkriante: Izraelidoj, helpu: Jen estas la viro, kiu ĉie
instruadas ĉiujn kontraŭ la popolo kaj la leĝo kaj ĉi

tiu loko, kaj ankaŭ li kondukis Grekojn en la templon
kaj profanis ĉi tiun sanktan lokon. 29 Ĉar ili antaŭe
vidis kun li en la urbo la Efesanon Trofimo; kaj ili
supozis, ke Paŭlo kondukis lin en la templon. 30 Kaj
la tuta urbo ekscitiĝis, kaj la popolo kunkuris; kaj
preninte Paŭlon, oni trenis lin ekster la templon; kaj
tuj la pordoj estis ŝlositaj. 31 Kaj dum ili penis lin
mortigi, famo venis al la ĉefkapitano de la kohorto,
ke la tuta Jerusalem tumultas. 32 Kaj li tuj kunvokis
soldatojn kaj centestrojn, kaj kuris malsupren sur ilin;
kaj ĉi tiuj, vidinte la ĉefkapitanon kaj soldatojn, ĉesis
bati Paŭlon. 33 Tiam la ĉefkapitano alproksimiĝis,
kaj arestis lin, kaj ordonis, ke oni ligu lin per du
katenoj, kaj demandis, kiu li estas, kaj kion li faris.
34 Kaj la amaso kriadis diverse ion kaj alion; kaj, ne
povante konstati la ĝuston pro la tumulto, li ordonis,
ke oni konduku lin en la fortikaĵon. 35 Kaj kiam li
venis sur la ŝtuparon, li estis portata de la soldatoj
pro la perforto de la amaso; 36 ĉar la multego de la
popolo sekvis, kriante: Forigu lin! 37 Kaj Paŭlo, jam
enkondukota en la fortikaĵon, diris al la ĉefkapitano:
Ĉu estas permesate al mi diri ion al vi? Kaj li diris: Ĉu
vi scias la Grekan lingvon? 38 Ĉu vi ne estas la Egipto,
kiu antaŭ kelka tempo ekmovis ribele kaj elkondukis
en la dezerton la kvar mil virojn de la Sikarioj? 39 Sed
Paŭlo diris: Mi estas Judo el Tarso en Kilikio, burĝo
de urbo ne malnobla; kaj mi petas vin, permesu al
mi paroli al la popolo. 40 Kaj kiam li tion permesis,
Paŭlo, starante sur la ŝtuparo, gestis per la mano al la
popolo; kaj kiam fariĝis granda silento, li parolis al ili
en la Hebrea lingvo, dirante:

**22** Fratoj kaj patroj, aŭskultu la pledon, kiun mi
faras nun antaŭ vi. 2 Kaj kiam ili aŭdis, ke li
parolas al ili en la Hebrea lingvo, ili des pli silentiĝis;
kaj li diris: 3 Mi estas Judo, naskita en Tarso en Kilikio,
sed edukita en ĉi tiu urbo ĉe la piedoj de Gamaliel,
kaj instruita laŭ la preciza maniero de nia prapatra
leĝo, kaj mi estis fervora pro Dio, kiel vi ĉiuj estas
hodiaŭ. 4 Kaj mi persekutis ĉi tiun Vojon ĝis la morto,
katenante kaj en karcerojn transdonante virojn kaj
virinojn. 5 Kiel ankaŭ atestas pri mi la ĉefpastro kaj
la tuta pliaĝularo, de kiuj mi ankaŭ ricevis leterojn
por la fratoj, kaj iris al Damasko, por konduki tiujn,
kiuj tie estis, katenitajn al Jerusalem, por puniĝi. 6
Kaj dum mi vojaĝis kaj alproksimiĝis al Damasko,
ĉirkaŭ tagmezo subite ekbrilis el la ĉielo granda lumo
ĉirkaŭ mi. 7 Kaj mi falis sur la teron, kaj aŭdis voĉon
dirantan al mi: Saŭlo, Saŭlo, kial vi min persekutas? 8
Kaj mi respondis: Kiu vi estas, Sinjoro? Kaj li diris al
mi: Mi estas Jesuo, la Nazaretano, kiun vi persekutas.
9 Kaj tiuj, kiuj estis kun mi, vidis ja la lumon, sed
ne aŭdis la voĉon de tiu, kiu parolis al mi. 10 Kaj
mi diris: Kion mi faru, Sinjoro? Kaj la Sinjoro diris
al mi: Leviĝu, kaj iru al Damasko; kaj tie vi ricevos
informon pri ĉio, kio estas difinita, ke vi ĝin faru. 11
Kaj, ĉar mi ne povis vidi pro la gloro de tiu lumo,
mi eniris en Damaskon mane kondukata de tiuj, kiuj
estis kun mi. 12 Kaj unu Ananias, piulo laŭ la leĝo,
bone atestata de ĉiuj Judoj tie loĝantaj, 13 venis al
mi, kaj apudstarante, diris al mi: Frato Saŭlo, ricevu
vian vidpovon. Kaj en tiu sama horo mi ekvidis, kaj
lin rigardis. 14 Kaj li diris: La Dio de niaj patroj difinis
vin, por ke vi sciu Lian vojon kaj vidu la Justulon kaj
aŭdu voĉon el lia buŝo. 15 Ĉar vi estos lia atestanto
antaŭ ĉiuj homoj pri ĉio, kion vi vidis kaj aŭdis. 16 Kaj
nun kial vi prokrastas? leviĝu, kaj baptiĝu, kaj forlavu
viajn pekojn, vokante lian nomon. 17 Kaj reveninte
al Jerusalem kaj preĝante en la templo, mi estis en
ekstazo, 18 kaj mi vidis lin dirantan al mi: Rapidu, kaj
eliru tuj el Jerusalem, ĉar ili ne akceptos vian ateston
pri mi. 19 Kaj mi diris: Sinjoro, ili mem scias, ke mi
malliberigis kaj batis en ĉiuj sinagogoj tiujn, kiuj
kredas al vi; 20 kaj kiam estis verŝata la sango de via
martiro Stefano, mi ankaŭ staris apude kaj konsentis,
kaj gardis la vestojn de tiuj, kiuj lin mortigis. 21 Kaj li
diris al mi: Foriru; ĉar mi vin sendos malproksimen al
la nacianoj. 22 Ili aŭskultis lin ĝis tiu vorto, sed tiam
ili levis sian voĉon, dirante: Forigu tian homon de sur
la tero; ĉar ne decas, ke li vivu. 23 Kaj dum ili kriis kaj
forĵetis siajn vestojn kaj ĵetis polvon en la aeron, 24
la ĉefkapitano ordonis konduki lin en la fortikaĵon,
kaj diris, ke oni ekzamenu lin per skurĝado, por ke li
sciiĝu, kial oni tiel forte kriis kontraŭ li. 25 Kaj kiam
ili ligis lin per rimenoj, Paŭlo diris al la apudstaranta
centestro: Ĉu estas laŭleĝe por vi skurĝi Romanon ne
kondamnitan? 26 Kaj kiam la centestro tion aŭdis, li
iris al la ĉefkapitano kaj raportis, dirante: Kion vi celas
fari? ĉar ĉi tiu viro estas Romano. 27 Kaj la ĉefkapitano
venis, kaj diris al li: Diru al mi, ĉu vi estas Romano?
Kaj li diris: Jes. 28 Kaj la ĉefkapitano respondis: Per
granda sumo mi akiris tiun civitanecon. Kaj Paŭlo
respondis: Sed mi naskiĝis tia. 29 Tiuj do, kiuj devis
ekzameni lin, tuj foriris de li; kaj la ĉefkapitano ankaŭ

timis, konstatinte, ke tiu estas Romano, kaj ke li lin
ligis. 30 Sed en la sekvanta tago, ĉar li volis certiĝi, pri
kio la Judoj lin akuzis, li malligis al li la katenojn, kaj
ordonis, ke la ĉefpastroj kaj la tuta sinedrio kunvenu;
kaj li kondukis Paŭlon malsupren, kaj starigis lin
antaŭ ili.

**23** Kaj Paŭlo, fikse rigardante la sinedrion, diris:
Fratoj, mi vivadis antaŭ Dio laŭ tute bona
konscienco ĝis la nuna tago. 2 Kaj la ĉefpastro Ananias
ordonis al la apudstarantoj frapi lian buŝon. 3 Tiam
diris Paŭlo al li: Dio vin frapos, vi kalkeblanka muro;
ĉu vi sidas, por juĝi min laŭ la leĝo, kaj kontraŭ la
leĝo ordonas, ke oni min frapu? 4 Kaj la apudstarantoj
diris: Ĉu vi insultas la ĉefpastron de Dio? 5 Kaj Paŭlo
diris: Mi ne sciis, fratoj, ke li estas ĉefpastro; ĉar estas
skribite: Estron de via popolo ne insultu. 6 Sed kiam
Paŭlo eksciis, ke unu parto konsistas el Sadukeoj,
kaj la alia el Fariseoj, li ekkriis en la sinedrio: Fratoj,
mi estas Fariseo, filo de Fariseo; pri la espero kaj
la releviĝo de la mortintoj mi estas juĝata. 7 Kaj
kiam li tion diris, malpaco okazis inter la Fariseoj
kaj la Sadukeoj, kaj la ĉeestantaro dividiĝis. 8 Ĉar
la Sadukeoj diras, ke ne estas releviĝo, nek anĝelo,
nek spirito; sed la Fariseoj konfesas ambaŭ. 9 Kaj
fariĝis bruego; kaj kelkaj skribistoj el la partio de la
Fariseoj stariĝis, kaj forte insistis, dirante: Ni trovas
nenian malbonon en ĉi tiu viro; kaj kio, se parolis al li
spirito aŭ anĝelo? 10 Kaj kiam fariĝis granda malpaco,
la ĉefkapitano, timante, ke Paŭlo estos disŝirita de
ili, ordonis al la soldataro malsupreniri kaj forkapti
lin perforte el la mezo de ili, kaj konduki lin en la
fortikaĵon. 11 Kaj la sekvantan nokton la Sinjoro staris
apud li, kaj diris: Kuraĝu; ĉar kiel vi jam atestis pri
mi en Jerusalem, tiel vi devas atesti ankaŭ en Romo.
12 Kaj je la tagiĝo la Judoj konspiris, kaj per solena
ĵuro sin ligis, dirante, ke ili nek manĝos nek trinkos,
ĝis ili mortigos Paŭlon. 13 Kaj pli ol kvardek estis la
tiel kunĵurintaj. 14 Kaj ili venis al la ĉefpastroj kaj la
pliaĝuloj, kaj diris: Ni per solena ĵuro ligis nin gustumi
nenion, ĝis ni mortigos Paŭlon. 15 Nun do vi kune kun
la sinedrio instigu la ĉefkapitanon, ke li konduku lin
al vi, kvazaŭ vi volus juĝi pri la afero pli precize; kaj
ni, antaŭ ol li alproksimiĝos, estos pretaj pereigi lin.
16 Sed la filo de la fratino de Paŭlo, enveninte, aŭdis
pri la embusko, kaj li iris en la fortikaĵon, kaj pri tio
sciigis Paŭlon. 17 Kaj Paŭlo alvokis unu el la centestroj,
kaj diris: Konduku ĉi tiun junulon al la ĉefkapitano,
ĉar li havas ion por diri al li. 18 Li do prenis lin kaj
kondukis lin al la ĉefkapitano, kaj diris: La katenito
Paŭlo min alvokis, kaj petis, ke mi konduku al vi ĉi
tiun junulon, kiu havas ion por diri al vi. 19 Kaj la
ĉefkapitano prenis lian manon, kaj, flankenirante,
demandis lin aparte: Kio estas tio, kion vi havas por
diri al mi? 20 Kaj li diris: La Judoj interkonsentis
peti, ke vi konduku Paŭlon malsupren morgaŭ en la
sinedrion, kvazaŭ ili intencus fari pri li esploron iom
pli precizan. 21 Sed ne konsentu al ili, ĉar embuskas
kontraŭ li pli ol kvardek el ili, kiuj per solena ĵuro
sin ligis nek manĝi nek trinki, ĝis ili lin pereigos; kaj
nun ili estas pretaj, kaj atendas de vi la promeson. 22
Tiam la ĉefkapitano forsendis la junulon, ordonante
al li: Eldiru al neniu, ke vi sciigis min pri ĉi tio. 23
Kaj alvokinte du el la centestroj, li diris: Pretigu
ducent soldatojn, por ke ili iru ĝis Cezarea, kun sepdek
rajdistoj kaj ducent lancistoj, je la tria horo nokte;
24 kaj provizu bestojn, por sidigi Paŭlon kaj konduki
lin sendanĝere al Felikso, la provincestro. 25 Kaj li
skribis leteron laŭ jena formo: 26 Klaŭdio Lisias al
lia ekscelenco Felikso, la provincestro, saluton. 27 Ĉi
tiu viro estis kaptita de la Judoj, kaj ili volis mortigi
lin; sed mi alvenis kun la soldataro kaj forsavis lin,
sciiĝinte, ke li estas Romano. 28 Kaj dezirante scii
la kaŭzon, pro kio ili lin akuzas, mi lin enkondukis
en ilian sinedrion; 29 kaj mi trovis lin akuzata pri
demandoj rilatantaj al ilia leĝo, sed havanta nenian
akuzon meritantan morton aŭ katenojn. 30 Kaj ĉar oni
montris al mi, ke estos konspiro kontraŭ la viro, mi
tuj sendis lin al vi, ordonante ankaŭ, ke liaj akuzantoj
atestu kontraŭ li antaŭ vi. 31 Tial la soldatoj, kiel estis
ordonite al ili, prenis Paŭlon kaj kondukis lin nokte
al Antipatris. 32 Kaj en la sekvanta tago ili lasis la
rajdistojn iri kun li, kaj ili ekiris returne al la fortikaĵo;
33 sed tiuj, enirinte en Cezarean kaj transdoninte la
leteron al la provincestro, enkondukis ankaŭ Paŭlon
antaŭ lin. 34 Kaj kiam li ĝin legis, li demandis, el kiu
provinco li venas; kaj kiam li sciiĝis, ke li estas el
Kilikio, 35 li diris: Mi aŭskultos vian proceson, kiam
viaj akuzantoj ankaŭ ĉeestos; kaj li ordonis, ke oni
gardu lin en la palaco de Herodo.

**24** Kaj post kvin tagoj la ĉefpastro Ananias
malsupreniris tien kun kelkaj pliaĝuloj, kaj unu
advokato, nomata Tertulo; kaj ili faris denuncon antaŭ

la provincestro kontraŭ Paŭlo. 2 Kaj kiam ĉi tiu estas
vokita, Tertulo komencis akuzi lin, dirante: Ĉar ni
ĝuadas grandan trankvilecon per vi, kaj malbonaĵoj
estas ĝustigitaj por ĉi tiu nacio per via antaŭzorgeco,
3 ni akceptas tion, ĉiel kaj ĉie, plej nobla Felikso, kun
plena dankemeco. 4 Sed (por ke mi vin ne tro tedu) mi
vin petegas aŭskulti nin mallonge, laŭ via bonkoreco.
5 Ĉar ni trovis ĉi tiun viron pestulo, kaj incitanta al
ribelado inter ĉiuj Judoj tra la tuta mondo, kaj ĉefo
de la Nazaretana sekto; 6 li provis ankaŭ profani la
templon; kaj ni arestis lin kaj volis juĝi lin laŭ nia
leĝo. 7 Sed la ĉefkapitano Lisias venis, kaj per granda
perforto forprenis lin el niaj manoj, 8 kaj ordonis al
liaj akuzantoj veni antaŭ vin; kaj nun, ekzamenante
lin, vi mem povos certiĝi pri ĉio, pro kio ni lin akuzas.
9 Kaj la Judoj ankaŭ konsentis, dirante, ke ĉi tio estas
vera. 10 Tiam Paŭlo, kiam la provincestro signis, ke
li parolu, respondis: Sciante, ke jam de multaj jaroj
vi estas juĝisto por ĉi tiu nacio, mi des pli volonte
min defendas; 11 ĉar vi povas certiĝi, ke pasis ne pli
ol dek du tagoj, de kiam mi supreniris al Jerusalem,
por adorkliniĝi; 12 kaj ili ne trovis min disputanta
kun iu aŭ incitanta la popolon en la templo, nek en la
sinagogoj, nek en la urbo. 13 Kaj ili ne povas pruvi la
aferojn, pri kiuj ili nun akuzas min. 14 Sed mi konfesas
al vi jenon: ke laŭ tiu Vojo, kiun ili nomas sekto, mi
adoras la Dion de miaj patroj, kredante ĉion, kio estas
laŭ la leĝo, kaj ĉion skribitan en la profetoj; 15 kaj
mi havas tiun esperon al Dio, kiun ili mem ankaŭ
akceptas, ke estos iam releviĝo de la justuloj kaj de la
maljustuloj. 16 En ĉi tio ankaŭ mi min ekzercadas,
havi ĉiam konsciencon neriproĉeblan antaŭ Dio kaj
homoj. 17 Kaj post multe da jaroj mi alvenis, por
alporti al mia nacio almozojn kaj oferojn; 18 ĉe tiaj
okupoj ili trovis min sanktigitan en la templo, ne kun
homamaso, nek kun tumulto; sed ĉeestis iuj Judoj el
Azio, 19 kiuj devus esti ĉi tie antaŭ vi kaj fari akuzon,
se ili havus ion kontraŭ mi. 20 Alie ĉi tiuj mem diru,
kian malbonfaron ili trovis en mi, kiam mi staris
antaŭ la sinedrio, 21 krom eble pri unu vorto, kiun
mi jene kriis, starante inter ili: Pri la releviĝo de la
mortintoj mi estas juĝata de vi hodiaŭ. 22 Sed Felikso,
konante iom precize la Vojon, prokrastis rilate ilin,
kaj diris: Kiam alvenos la ĉefkapitano Lisias, tiam mi
decidos vian aferon. 23 Kaj li ordonis al la centestro
gardi Paŭlon kun malsevereco, kaj ne malpermesi al
iu ajn el liaj amikoj lin viziti kaj helpi. 24 Kaj post
kelke da tagoj, Felikso venis kun sia edzino Drusila,
kiu estis Judino, kaj li venigis al si Paŭlon kaj aŭskultis
lin pri la fido al Kristo Jesuo. 25 Kaj dum Paŭlo rezonis
pri justeco, sinregado, kaj la juĝo estonta, Felikso
timiĝis, kaj respondis: La nunan fojon foriru; kiam
mi havos oportunan tempon, mi alvokos vin al mi.
26 Li ankaŭ esperis, ke mono estos donita de Paŭlo
al li, por ke li lin liberigu; tial li des pli ofte venigis
Paŭlon kaj interparoladis kun li. 27 Sed post du jaroj
Felikso estis anstataŭita de Porcio Festo; kaj Felikso,
dezirante akiri favoron ĉe la Judoj, lasis Paŭlon ligita.

25 Festo do, veninte en la provincon, post tri tagoj
supreniris de Cezarea al Jerusalem. 2 Kaj la
ĉefpastro kaj la ĉefoj de la Judoj faris denuncon al li
kontraŭ Paŭlo, kaj lin instigis, 3 petante de li favoron
kontraŭ Paŭlo, ke li venigu lin al Jerusalem; ĉar ili
aranĝis embuskon, por mortigi lin sur la vojo. 4 Tamen
Festo respondis, ke Paŭlo estas gardata en Cezarea,
kaj ke li mem baldaŭ iros tien. 5 Tial, li diris, la
eminentuloj el vi tien iru kun mi, kaj se estas io krima
en la viro, ili lin akuzu. 6 Kaj restinte inter ili ne pli ol
ok aŭ dek tagojn, li iris al Cezarea; kaj en la sekvanta
tago li sidiĝis sur la tribunala seĝo, kaj ordonis, ke oni
alkonduku Paŭlon. 7 Kaj kiam li alestis, la Judoj, kiuj
malsupreniris de Jerusalem, staris ĉirkaŭe, akuzante
lin pri multaj kaj gravaj kulpoj, kiujn ili ne povis pruvi;
8 tiam Paŭlo responde pledis: Nek kontraŭ la leĝo de la
Judoj, nek kontraŭ la templo, nek kontraŭ Cezaro mi
iamaniere ofendis. 9 Sed Festo, dezirante akiri favoron
ĉe la Judoj, respondis al Paŭlo, dirante: Ĉu vi volas
supreniri al Jerusalem, kaj tie esti juĝata antaŭ mi pri
ĉi tiuj aferoj? 10 Sed Paŭlo diris: Mi staras antaŭ la
tribunalo de Cezaro, kie mi devas esti juĝata; kontraŭ
la Judoj mi faris nenian malbonon, kiel ankaŭ vi tre
bone scias. 11 Se do mi estas krimulo, kaj faris ion
meritantan morton, mi ne rifuzas morti; sed se estas
vera nenio el tiuj aferoj, pri kiuj ili min akuzas, neniu
povas cedi min al ili. Mi apelacias al Cezaro. 12 Tiam
Festo, kunparolinte kun la konsilantaro, respondis:
Vi apelaciis al Cezaro; al Cezaro vi devos iri. 13 Kaj
post paso de kelke da tagoj, la reĝo Agripo kaj Bernike
venis al Cezarea kaj salutis Feston. 14 Kaj dum ili restis
tie multajn tagojn, Festo montris al la reĝo la aferon
de Paŭlo, dirante: Felikso lasis katenita unu viron,
15 pri kiu, kiam mi estis en Jerusalem, la ĉefpastro
kaj pliaĝuloj de la Judoj sciigis min, postulante juĝon

kontraŭ li. 16 Al ili mi respondis, ke ĉe la Romanoj
ne estas moro transdoni iun al morto, antaŭ ol la
akuzito havos la akuzantojn vizaĝon kontraŭ vizaĝo,
kaj ricevos permeson defendi sin pri la akuzo. 17 Kiam
do ili kunvenis ĉi tien, mi faris nenian prokraston,
sed en la sekvanta tago mi sidiĝis sur la tribunala
seĝo kaj ordonis alkonduki la viron. 18 La akuzantoj,
stariĝinte, prezentis pri li nenian kulpigon tian, kian
mi atendis, 19 sed havis kelkajn demandojn kontraŭ li
pri sia propra religio, kaj pri unu Jesuo, kiu mortis,
kaj pri kiu Paŭlo asertis, ke li vivas. 20 Kaj mi, en
embaraso, kiel fari ekzamenon pri tio, demandis, ĉu
li volas iri al Jerusalem kaj tie esti juĝata koncerne
tiun aferon. 21 Sed kiam Paŭlo apelaciis, ke li estu
rezervata por la decido de lia Imperiestra Moŝto, mi
ordonis gardi lin, ĝis mi povos lin sendi al Cezaro. 22
Kaj Agripo diris al Festo: Volonte ankaŭ mi aŭskultus
tiun viron. Morgaŭ, li diris, vi lin aŭskultos. 23 Tial en
la sekvanta tago, kiam venis Agripo kaj Bernike kun
grandioza parado, kaj ili eniris en la aŭditorion kun
la ĉefkapitanoj kaj la eminentuloj el la urbo, Festo
ordonis, kaj oni enkondukis Paŭlon. 24 Kaj Festo diris:
Reĝo Agripo, kaj ĉiuj viroj, kiuj ĉeestas kun ni, vi vidas
ĉi tiun, pri kiu la tuta amaso de la Judoj instigis min en
Jerusalem kaj ankaŭ ĉi tie, kriante, ke ne decas, ke li
vivu plu. 25 Sed mi trovis, ke li ne faris ion meritantan
morton; kaj ĉar li mem apelaciis al lia Imperiestra
Moŝto, mi decidis sendi lin. 26 Sed pri li mi havas
nenion precizan por skribi al mia sinjoro. Tial mi
elkondukis lin antaŭ vin ĉiujn, kaj precipe antaŭ vin,
reĝo Agripo, por ke post ekzameno mi havu ion por
skribi. 27 Ĉar ŝajnas al mi senracie, sendi arestiton,
kaj ne klarigi la akuzojn kontraŭ li metitajn.

**26** Kaj Agripo diris al Paŭlo: Estas permesate al vi
paroli por vi mem. Tiam Paŭlo, etendinte sian
manon, responde pledis: 2 Mi min trovas feliĉa, reĝo
Agripo, ke mi respondos antaŭ vi hodiaŭ rilate ĉion,
pri kio mi estas akuzita de la Judoj; 3 precipe ĉar vi
estas klera pri ĉiuj moroj kaj demandoj, kiuj ekzistas
ĉe la Judoj; tial mi petegas vin aŭskulti min pacience.
4 Mian vivmanieron de post mia juneco, kiu estis de
la komenco en mia nacio, en Jerusalem, ĉiuj Judoj
scias, 5 konante min jam longe, kaj sciante (se ili
volus atesti), ke laŭ la plej severa sekto de nia religio
mi vivis Fariseo. 6 Kaj nun mi staras ĉi tie juĝota pro
la espero de la promeso farita de Dio al niaj patroj, 7
al kiu promeso niaj dek du triboj, fervore servante
Dion nokte kaj tage, esperas atingi. Kaj pri tiu espero
mi estas akuzita de la Judoj, ho reĝo! 8 Kial oni ĉe
vi opinias nekredinde, ke Dio levos la mortintojn?
9 Mi mem ja pensis en mi, ke mi devas fari multajn
agojn kontraŭ la nomo de Jesuo, la Nazaretano. 10
Kaj tion mi ankaŭ faris en Jerusalem; kaj multajn el
la sanktuloj en karcerojn mi enŝlosis, ricevinte de
la ĉefpastroj la aŭtoritaton, kaj ĉe ilia mortigado mi
ilin per voĉdono kondamnis. 11 Kaj punante ilin tre
ofte en ĉiuj sinagogoj, mi penis devigi ilin blasfemi;
kaj forte furiozante kontraŭ ili, mi persekutis ilin
eĉ ĝis fremdaj urboj. 12 Por tiaj celoj vojaĝante al
Damasko kun aŭtoritato kaj komisio de la ĉefpastroj,
13 mi vidis tagmeze, ho reĝo, sur la vojo lumon el la
ĉielo, superantan la helecon de la suno, brilantan
ĉirkaŭ mi kaj miaj kunvojaĝantoj. 14 Kaj kiam ni ĉiuj
falis sur la teron, mi aŭdis voĉon, dirantan al mi en la
Hebrea lingvo: Saŭlo, Saŭlo, kial vi min persekutas?
estas malfacile por vi piedbati kontraŭ la pikiloj. 15
Kaj mi diris: Kiu vi estas, Sinjoro? Kaj la Sinjoro diris:
Mi estas Jesuo, kiun vi persekutas. 16 Sed leviĝu, kaj
stariĝu sur viaj piedoj; ĉar por tio mi aperis al vi, por
difini vin kiel servanton al mi kaj atestanton pri la
cirkonstancoj, en kiuj vi jam vidis min, kaj ankaŭ en
kiuj mi poste aperos al vi; 17 liberigante vin de la
popolo kaj de la nacianoj, al kiuj mi vin sendas, 18 por
malfermi iliajn okulojn, ke ili sin turnu de mallumo
al lumo, kaj de la aŭtoritato de Satano al Dio, por
ke ili ricevu pardonon de pekoj, kaj heredaĵon inter
tiuj, kiuj sanktiĝis per fido al mi. 19 Tial, ho reĝo
Agripo, mi ne iĝis malobeema al la ĉiela vizio; 20 sed
proklamis unue al la Damaskanoj, kaj en Jerusalem,
kaj tra la tuta regiono de Judujo, kaj ankaŭ al la
nacianoj, ke ili pentu kaj sin turnu al Dio, farante
farojn indajn je pento. 21 Pro ĉi tio la Judoj kaptis
min en la templo kaj celis mortigi min. 22 Ricevinte
do la helpon, kiu estas de Dio, mi staras ĝis la nuna
tago, atestante al malgranduloj kaj granduloj, dirante
nenion krom tio, kion la profetoj kaj Moseo anoncis
kiel venontan: 23 ke la Kristo devas suferi, kaj ke li
unua per la revivigado de mortintoj proklamos lumon
al la popolo kaj al la nacianoj. 24 Kaj dum li tiel pledis,
Festo diris per laŭta voĉo: Paŭlo, vi frenezas; multe
da studado vin frenezigas. 25 Sed Paŭlo diris: Mi ne
frenezas, plej nobla Festo, sed mi malkaŝe parolas
vortojn de vero kaj prudento. 26 Ĉar tiujn aferojn tre

bone scias la reĝo, al kiu mi parolas maltime; ĉar mi
konvinkiĝis, ke nenio el ĉi tio estas kaŝita for de li,
ĉar ĉi tio ne estas farita en angulo. 27 Reĝo Agripo,
ĉu vi kredas la profetojn? mi ja scias, ke vi kredas.
28 Kaj Agripo diris al Paŭlo: En mallonga tempo vi
konvinkos min fariĝi Kristano. 29 Kaj Paŭlo diris: Mi
volus preĝi al Dio, ke, ĉu en mallonga aŭ en longa,
ne nur vi, sed ankaŭ ĉiuj, kiuj aŭskultas min hodiaŭ,
fariĝu tiaj, kia mi estas, krom ĉi tiuj katenoj. 30 Kaj
stariĝis la reĝo kaj la provincestro kaj Bernike kaj la
kunsidantoj; 31 kaj apartiĝinte, ili parolis inter si,
dirante: Tiu viro faris nenion meritantan morton aŭ
katenojn. 32 Kaj Agripo diris al Festo: Tiu viro povus
esti tuj liberigita, se li ne apelacius al Cezaro.

**27** Kaj kiam estis decidite, ke ni ŝipiru al Italujo, oni
transdonis Paŭlon kaj kelkajn aliajn malliberulojn
al centestro, nomata Julio, el la Aŭgusta kohorto.
2 Kaj enirinte en ŝipon el Adramitio, veturontan al
la lokoj ĉe la marbordo de Azio, ni ekveturis sur
la maron, havante kun ni Aristarĥon, Makedonon
el Tesaloniko. 3 Kaj la sekvantan tagon ni vizitis
Cidonon; kaj Julio kondutis afable rilate Paŭlon, kaj
permesis al li iri al siaj amikoj kaj refreŝiĝi. 4 Kaj
irinte de tie sur la maron, ni preterveturis sub la
ŝirmo de Kipro, ĉar la ventoj estis kontraŭaj. 5 Kaj
transveturinte la maron apud Kilikio kaj Pamfilio, ni
alvenis al Mira en Likio. 6 Kaj la centestro, trovinte
tie ŝipon Aleksandrian veturontan al Italujo, enirigis
nin en ĝin. 7 Kaj veturante malrapide dum multe
da tagoj kaj venkinte kun malfacileco proksime al
Knido (ĉar la vento ne permesis al ni atingi ĝin),
ni veturis sub la ŝirmo de Kreto, apud Salmone; 8
kaj kun malfacileco veturinte preter la marbordo, ni
alvenis al loko, nomata Belaj Havenoj, proksime de
kiu estas la urbo Lasaja. 9 Kaj kiam pasis multe da
tempo, kaj la vojaĝo jam fariĝis danĝera, ĉar jam pasis
la Fasto, Paŭlo avertis ilin, 10 dirante al ili: Ho viroj,
mi ekvidas, ke la vojaĝo estos kun difekto kaj multa
perdo, ne nur de la ŝarĝo kaj de la ŝipo, sed ankaŭ de
niaj vivoj. 11 Sed la centestro atentis pli la konsilon de
la direktilisto kaj la posedanto de la ŝipo, ol la parolon
de Paŭlo. 12 Kaj ĉar la haveno ne estis sufiĉe vasta, por
tie travintri, la plimulto konsilis ŝipiri de tie, se eble ili
povos atingi Fenikson, havenon de Kreto, kiu rigardas
en la direkto al la nordokcidenta kaj la sudokcidenta
ventoj, por tie travintri. 13 Kaj kiam la suda vento
blovis malpli forte, ili supozis, ke ili atingis sian celon,
kaj levinte la ankrojn, ili preterveturis Kreton tre
proksime. 14 Sed post mallonga tempo atakis nin el ĝi
uragana vento, kiu estas nomata Eŭrakilo; 15 kaj kiam
la ŝipo estis kaptita kaj ne povis kontraŭstari al la
vento, ni cedis kaj estis pelataj. 16 Kaj kurinte sub
la ŝirma flanko de insuleto, nomata Kaŭda, ni kun
granda klopodo apenaŭ povis savi la boaton; 17 kaj
suprenlevinte ĝin, oni uzis helpilojn, por subzoni la
ŝipon; kaj timante, ke ni estos ĵetataj sur la Sirtison,
oni mallevis la ilaron kaj tiel estis pelataj. 18 Kaj kiam
ni estis treege premataj de la ventego, la sekvantan
tagon ili komencis elĵetadon; 19 kaj la trian tagon oni
elĵetis per siaj propraj manoj la ekipaĵon de la ŝipo.
20 Kaj kiam dum multe da tagoj nek suno nek steloj
ekbrilis sur nin, kaj uragano nemalgranda ĉirkaŭis
nin, fine ĉia espero pri nia savo estis forprenita. 21 Kaj
kiam ili jam de longe nenion manĝis, Paŭlo, stariĝinte
meze de ili, diris: Ho viroj, vi devis aŭskulti min,
kaj ne ŝipiri el Kreto, kaj ne suferi ĉi tiun difekton
kaj perdon. 22 Kaj nun mi admonas vin esti kuraĝaj;
ĉar estos neniu perdo de vivo inter vi, sed nur de la
ŝipo. 23 Ĉar en tiu nokto staris apud mi anĝelo de
la Dio, kies mi estas kaj al kiu mi servas, 24 dirante:
Paŭlo, ne timu; vi devas stari antaŭ Cezaro; kaj jen
Dio donacis al vi ĉiujn, kiuj marveturas kun vi. 25
Tial, viroj, kuraĝu; ĉar mi kredas al Dio, ke la afero
estos tiel, kiel estas dirite al mi. 26 Tamen ni devas
esti ĵetitaj sur ian insulon. 27 Sed kiam venis la dek-
kvara nokto, kaj ni estis ĉirkaŭpelataj en la Adria
maro, la maristoj eksentis ĉirkaŭ noktomezo, ke ili
alproksimiĝas al ia lando; 28 kaj sondinte, ili trovis
dudek klaftojn; kaj post mallonga interspaco ili ree
sondis, kaj trovis dek kvin klaftojn. 29 Kaj timante, ke
ni falos sur malmolajn lokojn, ili ĵetis kvar ankrojn el
la ŝiplmalantaŭo, kaj preĝis, ke tagiĝu. 30 Kaj kiam
la maristoj serĉis rimedon forkuri el la ŝipo, kaj jam
mallevis la boaton en la maron sub preteksto, ke ili
demetos ankrojn el la antaŭo, 31 Paŭlo diris al la
centestro kaj la soldatoj: Se ĉi tiuj ne restos en la ŝipo,
vi ne povas saviĝi. 32 Tiam la soldatoj detranĉis la
ŝnurojn de la boato, kaj lasis ĝin defali. 33 Sed ĝis
venis la tagiĝo, Paŭlo petis ĉiujn, ke ili prenu iom
da nutraĵo, kaj li diris: La nuna tago estas la dek-
kvara, en kiu vi daŭre atendas kaj fastadas, preninte
nenion. 34 Tial mi petas vin preni nutraĵon, ĉar ĉi tio
koncernas vian savon; ĉar eĉ unu haro ne pereos el la

kapo al vi ĉiuj. 35 Kaj dirinte tion kaj preninte panon,
li donis dankon al Dio antaŭ ĉiuj; kaj dispeciginte
ĝin, li komencis manĝi. 36 Tiam ili ĉiuj kuraĝiĝis,
kaj ankaŭ mem prenis nutraĵon. 37 Kaj ni ĉiuj en la
ŝipo estis ducent sepdek ses animoj. 38 Kaj manĝinte
ĝissate, ili malpezigis la ŝipon, elĵetante la tritikon en
la maron. 39 Kaj kiam plene tagiĝis, ili ne rekonis la
landon; sed ili ekvidis unu golfeton kun sablaĵo, kaj ili
konsiliĝis inter si, ĉu ili povos surpeli sur ĝin la ŝipon.
40 Kaj forlasinte la ankrojn, ili lasis ilin en la maro,
kaj samtempe malligis la ŝnurojn de la direktiloj; kaj
suprenlevinte la antaŭvelon kontraŭ la vento, ili sin
direktis al la sablaĵo. 41 Sed trafinte lokon, kie du
marmovoj sin renkontas, ili surterigis la ŝipon; kaj la
antaŭo fiksiĝis kaj restis nemovebla, sed la malantaŭo
rompiĝis de la forto de la ondoj. 42 Kaj fariĝis intenco
ĉe la soldatoj mortigi la malliberulojn, por ke neniu el
ili elnaĝu kaj forkuru. 43 Sed la centestro, dezirante
savi Paŭlon, malhelpis ilin de tiu decido, kaj ordonis,
ke tiuj, kiuj povas naĝi, forĵetu sin unuaj kaj iru al la
tero; 44 kaj ke la ceteraj sin savu, jen sur tabuloj, jen
sur diversaj objektoj el la ŝipo. Kaj tiamaniere ĉiuj
saviĝis sur la teron.

**28** Kaj kiam ni saviĝis, tiam ni sciiĝis, ke la insulo
estas nomata Melita. 2 Kaj la barbaroj montris
al ni neordinaran bonecon; ĉar ili ekbruligis fajron
kaj akceptis nin ĉiujn pro la tiama pluvo kaj pro la
malvarmeco. 3 Sed kiam Paŭlo kolektis faskon da
vergoj kaj metis ĝin sur la fajron, vipuro, elveninte
de la varmo, alkroĉiĝis al lia mano. 4 Kaj kiam la
barbaroj vidis la beston pendantan de lia mano, ili
diris unu al alia: Sendube ĉi tiu viro estas mortiginto,
al kiu, kvankam li saviĝis de la maro, tamen Justeco
ne permesas vivi. 5 Sed li forskuis la beston en la
fajron, kaj ne suferis malbonon. 6 Sed ili atendis, ke li
ŝvelos aŭ falos subite mortinta; sed longe atendinte,
kaj vidinte, ke nenia malbono okazas al li, ili ŝanĝis
sian opinion, kaj diris, ke li estas dio. 7 Proksime
de tiu loko estis bieno, apartenanta al la estro de la
insulo; lia nomo estis Publio; li akceptis nin kaj amike
gastigis nin tri tagojn. 8 Kaj la patro de Publio kuŝis
malsana de febro kaj disenterio; al li Paŭlo eniris,
kaj preĝis, kaj, metinte la manojn sur lin, sanigis
lin. 9 Kaj post tiu faro, ankaŭ ceteraj insulanoj, kiuj
havis malsanojn, venis kaj estis sanigitaj; 10 ĉi tiuj
ankaŭ honoris nin per multaj honoroj; kaj kiam ni
ekveturis, ili surŝipigis ĉion, kion ni bezonis. 11 Kaj
post tri monatoj ni ekveturis en ŝipo Aleksandria,
kiu travintris ĉe la insulo; kaj ĝia insigno estis la
Ĝemeloj. 12 Kaj albordiĝinte ĉe Sirakuso, ni restis
tie tri tagojn. 13 Kaj de tie ni ĉirkaŭiris kaj alvenis
en Region; kaj post unu tago ekblovis suda vento,
kaj la duan tagon ni venis al Puteoli, 14 kie ni trovis
fratojn kaj estis petataj resti ĉe ili sep tagojn, kaj
tiel poste ni vojaĝis al Romo. 15 Kaj de tie la fratoj,
aŭdinte pri ni, venis al ni renkonte ĝis la Vendejo de
Apio kaj la Tri Gastejoj; kaj vidante ilin, Paŭlo dankis
Dion, kaj kuraĝiĝis. 16 Kaj kiam ni eniris en Romon, al
Paŭlo estis permesate loĝi sola kun la soldato, kiu lin
gardis. 17 Kaj post tri tagoj, li kunvokis tiujn, kiuj estis
eminentuloj inter la Judoj; kaj kiam ili kunvenis, li
diris al ili: Fratoj, kvankam mi faris nenion kontraŭ la
popolo nek kontraŭ la moroj de niaj patroj, tamen
mi estis transdonita kiel malliberulo el Jerusalem en
la manojn de la Romanoj, 18 kiuj, ekzameninte min,
volis liberigi min, ĉar en mi estis nenio meritanta
morton. 19 Sed kiam la Judoj kontraŭparolis, tiam mi
estis devigata apelacii al Cezaro; ne kvazaŭ mi havis
ion, pri kio akuzi mian nacion. 20 Pro tio do mi petis
vin viziti min kaj kunparoli, ĉar pro la espero de Izrael
mi portas ĉi tiun katenon. 21 Kaj ili diris al li: Ni ne
ricevis el Judujo leterojn pri vi, kaj neniu el la fratoj,
alveninte, raportis aŭ parolis pri vi ion malbonan. 22
Sed ni deziras aŭdi de vi, kion vi opinias; ĉar pri tiu
sekto ni scias, ke ĉie oni kontraŭparolas al ĝi. 23 Kaj
difininte tagon por li, ili grandnombre venis al li en
lian loĝejon; kaj li faris al ili klarigon, atestante la
regnon de Dio, kaj penante konvinki ilin pri Jesuo,
el la leĝo de Moseo kaj el la profetoj, de mateno ĝis
vespero. 24 Kaj unuj kredis la parolitaĵojn, kaj aliaj ne
kredis. 25 Kaj ne konsentante inter si, ili foriris, post
kiam Paŭlo parolis unu vorton: Bone parolis la Sankta
Spirito per la profeto Jesaja al viaj patroj, 26 dirante:
Iru al tiu popolo, kaj diru: Aŭdante, vi aŭdos, sed ne
komprenos; Kaj vidante, vi vidos, sed ne rimarkos;
27 Ĉar la koro de tiu popolo grasiĝis, Kaj iliaj oreloj
aŭdas malklare, Kaj siajn okulojn ili fermis, Por ke
ili ne vidu per siaj okuloj, Kaj por ke ili ne aŭdu per
siaj oreloj, Kaj por ke ili ne komprenu per sia koro,
Kaj por ke ili ne konvertiĝu, Kaj por ke Mi ne sanigu
ilin. 28 Certiĝu do al vi, ke ĉi tiu savado de Dio estas
sendata al la nacianoj, kaj ili aŭskultos. 29 Kaj kiam
li diris tion, la Judoj foriris, havante inter si multe

da disputado. **30** Kaj li loĝadis tutajn du jarojn en
sia propra loĝejo, kaj li akceptis ĉiujn, kiuj eniris al
li, **31** predikante la regnon de Dio, kaj instruante la
aferojn pri la Sinjoro Jesuo Kristo kun plena maltimo,
malhelpate de neniu.

# Romanoj

1 Paŭlo, servisto de Jesuo Kristo, apostolo vokita,
apartigita al la evangelio de Dio, 2 kiun Li promesis
antaŭe per Siaj profetoj en la sanktaj skriboj, 3 pri Sia
Filo, kiu naskiĝis el la idaro de David laŭ la karno,
4 la difinita Filo de Dio en potenco laŭ la Spirito
de sankteco per la releviĝo de la mortintoj — Jesuo
Kristo, nia Sinjoro, 5 per kiu ni ricevis gracon kaj
apostolecon por obeemo de fido ĉe ĉiuj nacioj pro lia
nomo, 6 inter kiuj estas ankaŭ vi, vokitaj de Jesuo
Kristo; 7 al ĉiuj, kiuj estas en Romo, amataj de Dio,
vokitaj sanktuloj: Graco al vi kaj paco de Dio, nia
Patro, kaj de la Sinjoro Jesuo Kristo. 8 Unue mi dankas
al mia Dio per Jesuo Kristo por vi ĉiuj, ke via fido estas
proklamata tra la tuta mondo. 9 Ĉar mia atestanto
estas Dio, kiun mi servas en mia spirito en la evangelio
de Lia Filo, ke mi senĉese memorigas pri vi en miaj
preĝoj, 10 ĉiam petante, ke iel al mi jam fine prosperos
veni al vi per la volo de Dio. 11 Ĉar mi sopiras vin vidi,
por ke mi transdonu al vi ian spiritan donacon, por
ke vi estu firmigitaj; 12 tio estas, por ke estu inter
ni reciproka kuraĝigo, per la komuna fido, egale via
kaj mia. 13 Kaj mi ne volas, ke vi nesciu, fratoj, ke
ofte mi celis veni al vi (sed mi estas malhelpita ĝis
nun), por ke mi havu iom da frukto ĉe vi, kiel ankaŭ
ĉe la aliaj nacioj. 14 Mi estas ŝuldanto al Grekoj kaj
al Barbaroj, al saĝuloj kaj al senprudentuloj. 15 Tial
laŭ mia eblo mi estas fervora prediki la evangelion
ankaŭ al vi, kiuj estas en Romo. 16 Ĉar mi ne hontas
pri la evangelio; ĉar ĝi estas la potenco de Dio al savo
por ĉiu, kiu kredas, al la Judoj unue, kaj ankaŭ al la
Grekoj. 17 Ĉar la justeco de Dio malkaŝiĝas en ĝi de
fido al fido, kiel estas skribite: La virtulo vivos per
sia fideleco. 18 Ĉar la kolero de Dio malkaŝiĝas el la
ĉielo kontraŭ ĉia malpieco kaj maljusteco de homoj,
kiuj tenas la veron en maljusteco; 19 ĉar la scio pri
Dio estas elmontrita ĉe ili, ĉar Dio elmontris ĝin al
ili. 20 Ĉar Liaj nevideblaj ecoj de post la kreado de
la mondo fariĝas videblaj, sentate per Liaj faritaĵoj,
nome, Lia eterna potenco kaj dieco; tial al ili mankas
defenda pledo; (aïdios g126) 21 ĉar konante Dion, ili ne
gloris Lin kiel Dion, nek estis dankemaj, sed vaniĝis
per diskutadoj, kaj ilia sensaĝa koro mallumiĝis. 22
Pretendante esti saĝaj, ili malsaĝiĝis, 23 kaj ŝanĝis la
gloron de la senmorta Dio en bildon de morta homo
kaj de birdoj kaj kvarpiedaj bestoj kaj rampaĵoj. 24
Tial Dio fordonis ilin al la voluptoj de iliaj koroj, al
malpureco, por ke iliaj korpoj malhonoriĝu inter ili
mem; 25 kiuj ŝanĝis la veron de Dio en mensogon, kaj
adoris kaj servis la kreitaĵojn prefere ol la Kreinton,
kiu estas eterne benata. Amen. (aiōn g165) 26 Tial Dio
fordonis ilin al malhonoraj pasioj; ĉar iliaj virinoj
ŝanĝis la naturan uzadon en kontraŭnaturan; 27 kaj
tiel same ankaŭ la viroj, forlasante la naturan uzadon
de la virino, brulis en sia volupto unu al alia, kaj viroj
kun viroj faris hontindaĵon kaj ricevis en si mem la
taŭgan rekompencon de sia malvirto. 28 Kaj ĉar ili
malŝatis teni Dion en sia konado, Dio fordonis ilin
al malaprobinda menso, por ke ili faru nedecaĵojn;
29 plenigite de ĉia maljusteco, malvirteco, avideco,
malboneco; plenaj de envio, mortigo, malpaco, ruzo,
malico; flustrantaj, 30 kalumniantaj, Dimalamantaj,
insultantaj, arogantaj, fanfaronemaj, elpensantaj
malbonaĵojn, malobeemaj al gepatroj, 31 senprudentaj,
nefidindaj, neparencamaj, senkompataj; 32 kiuj,
sciante pri la juĝo de Dio, ke la farantoj de tiaj agoj
meritas morton, ne nur mem faras ilin, sed ankaŭ
konsentas al la farantoj de ili.

2 Sekve, vi estas nedefendebla, ho ĉiu homo juĝanta;
ĉar dum vi juĝas alian, vi kondamnas vin mem,
ĉar vi, la juĝanto, faradas la samajn agojn. 2 Kaj ni
scias, ke la juĝo de Dio estas laŭ vero kontraŭ tiuj, kiuj
faradas tiajn agojn. 3 Kaj ĉu vi kalkulas, ho homo, kiu
juĝas la farantojn de tiaj agoj kaj faras la samajn, ke
vi evitos la juĝon de Dio? 4 Aŭ ĉu vi malestimas la
riĉecon de Lia boneco kaj toleremeco kaj pacienco, ne
sciante, ke la boneco de Dio alkondukas vin al pento?
5 sed laŭ via obstineco kaj senpenta koro vi amasigas
por vi koleron en la tago de kolero kaj malkaŝigo de la
justa juĝo de Dio, 6 kiu redonos al ĉiu homo laŭ liaj
faroj; 7 al tiuj, kiuj per pacienco en bonfarado celas
al gloro kaj honoro kaj senmorteco, eternan vivon;
(aiōnios g166) 8 sed al tiuj, kiuj estas malpacemaj kaj
ne obeas al la vero, sed obeas al maljusteco, koleron
kaj indignon, 9 aflikton kaj maltrankvilon, sur ĉiun
animon de homo, kiu faras malbonon, de Judo unue
kaj de Greko; 10 sed gloron kaj honoron kaj pacon al
ĉiu, kiu faras bonon, al Judo unue kaj al Greko; 11 ĉar
ne estas personfavorado ĉe Dio. 12 Ĉar ĉiu, kiu pekis
sen leĝo, ankaŭ pereos sen leĝo; kaj ĉiu, kiu pekis sub
leĝo, estos juĝata per leĝo; 13 ĉar ne la aŭskultantoj
de leĝo estos justaj antaŭ Dio, sed la plenumantoj de

leĝo estos pravigitaj 14 ĉar kiam la nacianoj, kiuj ne
havas la leĝon, faras nature la aferojn de la leĝo, ĉi
tiuj, ne havante leĝon, estas leĝo por si mem; 15 kiuj
elmontras la faradon de la leĝo skribita en iliaj koroj,
kiam ilia konscienco kunatestas, kaj iliaj rezonadoj
inter si akuzas aŭ defendas ilin.) 16 en la tago, kiam
Dio juĝos la sekretojn de homoj, laŭ mia evangelio,
per Jesuo Kristo. 17 Sed se vi estas nomata Judo, kaj
apogas vin sur la leĝon, kaj fieras pri Dio, 18 kaj konas
Lian volon, kaj aprobas la aprobindaĵojn, kaj estas
instruita el la leĝo, 19 kaj estas konvinkita, ke vi mem
estas gvidanto por la blinduloj, lumo por tiuj, kiuj
estas en mallumo, 20 edukanto por la senprudentuloj,
instruanto por infanoj, havante en la leĝo la formon
de la scio kaj la vero; 21 vi, kiu instruas alian, ĉu vi
ne instruas vin mem? vi, kiu predikas: Ne ŝtelu; ĉu
vi ŝtelas? 22 vi, kiu diras: Ne adultu; ĉu vi adultas?
vi, kiu abomenas idolojn, ĉu vi prirabas templojn?
23 vi, kiu fieras pri la leĝo, ĉu vi malhonoras Dion
per via transpaŝo de la leĝo? 24 Ĉar pro vi, la nomo
de Dio estas blasfemata inter la nacianoj, kiel estas
skribite. 25 Ĉar cirkumcido vere utilas, se vi estas
faranto de la leĝo; sed se vi estas pekanto kontraŭ la
leĝo, via cirkumcido fariĝas necirkumcido. 26 Se do
necirkumcidulo plenumas la ordonojn de la leĝo, ĉu
lia necirkumcido ne kalkuliĝos kiel cirkumcido? 27
kaj ĉu la laŭnatura necirkumcidulo, se li plenumas la
leĝon, ne juĝos vin, kiu kun la skribo kaj cirkumcido
transpaŝas la leĝon? 28 Ĉar Judo estas ne tiu, kiu estas
ekstere tia, kaj cirkumcido estas ne tio, kio estas tia
ekstere en la karno; 29 sed Judo estas tiu, kiu estas
interne tia, kaj cirkumcido estas en la koro, laŭ la
spirito, ne laŭ la litero, kies laŭdo estas ne de homoj,
sed de Dio.

**3** Kia do estas la supereco de la Judoj? aŭ kia estas la
utilo de cirkumcido? 2 Multa en ĉiu rilato: unue, ke
al ili estis konfiditaj la orakoloj de Dio. 3 Ĉu do estas
grave, se kelkaj ne fidis? ĉu ilia senfideco vantigos la
fidelecon de Dio? 4 Nepre ne! Dio montriĝu vera, sed
ĉiu homo mensoganto, kiel estas skribite: Ke Vi estu
justa en Via vorto Kaj pura en Via juĝo. 5 Sed se nia
maljusteco rekomendas la justecon de Dio, kion ni
diros? Ĉu maljusta estas Dio, kiu alportas koleron?
(Mi parolas kiel homo.) 6 Nepre ne! ĉar kiel Dio juĝus
la mondon? 7 Ĉar se la vero de Dio per mia mensogo
abundis al Lia gloro, kial mi estas ankoraŭ juĝata, kiel
pekinto? 8 kaj kial ne (kiel ni estas kalumniataj, kaj
kelkaj asertas, ke ni diras): Ni faru malbonon, por
ke venu bono? ilia kondamno estas justa. 9 Kio do?
ĉu ni nin senkulpigas? Tute ne: ĉar ni jam akuzis
egale Judojn kaj Grekojn, ke ĉiuj estas sub peko; 10
kiel estas skribite: Ne ekzistas justulo, ne eĉ unu; 11
Ne ekzistas prudentulo, Ne ekzistas iu, kiu serĉas
Dion; 12 Ĉiuj devojiĝis, ĉiuj senutiliĝis; Ekzistas neniu,
kiu faras bonon, ne eĉ unu; 13 Malfermita tombo
estas ilia gorĝo; Per sia lango ili hipokritis; Veneno de
vipuro estas sub iliaj lipoj; 14 Ilia buŝo estas plena
de malbenado kaj malico; 15 Iliaj piedoj rapidas, por
verŝi sangon; 16 Ruinigo kaj pereigo estas sur iliaj
vojoj; 17 Kaj vojon de paco ili ne konas; 18 Antaŭ iliaj
okuloj ne ekzistas timo antaŭ Dio. 19 Sed ni scias,
ke ĉion ajn, kion la leĝo diras, ĝi parolas al tiuj, kiuj
estas sub la leĝo; ke ĉiu buŝo fermiĝu, kaj ke la tuta
mondo submetiĝu sub la juĝon de Dio; 20 ĉar per la
faroj de la leĝo neniu karno praviĝos antaŭ Li; ĉar per
la leĝo venas konscio pri peko. 21 Sed nun, ekster la
leĝo, justeco de Dio montriĝis, atestata per la leĝo
kaj la profetoj; 22 nome, la justeco de Dio, per fido
al Jesuo Kristo, por ĉiuj kredantoj, ĉar ne ekzistas
diferencigo; 23 ĉar ĉiuj pekis kaj maltrafis la gloron de
Dio; 24 pravigite donace de Lia graco, per la elaĉeto,
kiu estas en Kristo Jesuo; 25 kiun Dio antaŭdifinis kiel
repacigilon per fido en lia sango, por la elmontrado
de Sia justeco per la pardono de la pekoj, antaŭe
faritaj laŭ la toleremeco de Dio; 26 por la elmontrado
de Lia justeco en la nuna tempo, kaj ke Li estas mem
justa, kaj estas la praviganto de tiu, kiu havas fidon
en Jesuo. 27 Kie do estas la fanfaronado? Ĝi estas
esceptita. Per kia leĝo? de faroj? Ne; sed per la leĝo
de fido. 28 Ni do konkludas, ke homo praviĝas per
fido, ekster la faroj de la leĝo. 29 Ĉu Dio estas nur Dio
de la Judoj? ĉu ne ankaŭ de la nacianoj? Jes, ankaŭ de
la nacianoj; 30 ĉar Dio estas unu, kaj Li pravigos la
cirkumcidularon pro fido kaj la necirkumcidularon
per fido. 31 Ĉu ni do per fido vantigas la leĝon? Nepre
ne! sed ni firmigas la leĝon.

**4** Kion do, ni diros, trovis Abraham, nia praavo laŭ
la karno? 2 Ĉar se Abraham praviĝis per faroj, li
havas ion, pri kio fieri, sed ne antaŭ Dio. 3 Ĉar kion
diras la Skribo? Kaj Abraham kredis al Dio, kaj tio estis
kalkulita al li kiel virto. 4 Al tiu, kiu laboras, la salajro
estas kalkulata ne kiel favoro, sed kiel ŝuldo. 5 Sed al

tiu, kiu ne laboras, sed kredas al Tiu, kiu pravigas la
malpiulon, lia fido estas kalkulata kiel virto. 6 Kiel
David ankaŭ pridiras la feliĉon de la homo, al kiu Dio
kalkulas virton ekster faroj, 7 dirante: Feliĉaj estas
tiuj, kies krimoj estas pardonitaj, Kies pekoj estas
kovritaj. 8 Feliĉa estas la homo, al kiu la Eternulo ne
kalkulas lian kulpon. 9 Ĉu do ĉi tiu feliĉo apartenas al
la cirkumcidularo, aŭ al la necirkumcidularo ankaŭ?
Ĉar ni diras, ke al Abraham la fido estis kalkulita kiel
virto. 10 Kiel do ĝi estis kalkulita? kiam li estis en
cirkumcido, aŭ en necirkumcido? Ne en cirkumcido,
sed en necirkumcido; 11 kaj li ricevis la signon de
cirkumcido, kiel sigelon de la virto de la fido, kiu
ekzistis en lia necirkumcido; por ke li estu la patro
de ĉiuj, kiuj ankoraŭ en necirkumcido kredas, por ke
virto estu kalkulata al ili; 12 kaj la patro de cirkumcido
al tiuj, kiuj ne nur estas anoj de la cirkumcido, sed
kiuj ankaŭ sekvas la paŝojn de tiu fido, kiun nia patro
Abraham havis dum sia necirkumcido. 13 Ĉar ne per
la leĝo fariĝis la promeso al Abraham aŭ al lia idaro,
ke li estos heredanto de la mondo, sed per la virto
el fido. 14 Ĉar se tiuj, kiuj estas laŭ la leĝo, estas
heredantoj, la fido nuliĝis, kaj la promeso vantiĝis; 15
ĉar la leĝo elfaras koleron; sed kie ne ekzistas leĝo, tie
ankaŭ ne ekzistas transpaŝo. 16 Ĝi do estas el fido
por tio, ke ĝi estu laŭ graco; por ke la promeso estu
firma al la tuta idaro, ne nur al tiu, kiu estas el la leĝo,
sed ankaŭ al tiu, kiu estas el la fido de Abraham, kiu
estas la patro de ni ĉiuj 17 (kiel estas skribite: Mi faris
vin patro de multe da popoloj) antaŭ Tiu, al kiu li
kredis, nome Dio, kiu vivigas la mortintojn, kaj vokas
la neekzistantaĵojn, kvazaŭ ili ekzistus. 18 Li ekster
espero kredis en espero, por ke li fariĝu patro de
multe da popoloj, laŭ la diritaĵo: Tiel estos via idaro.
19 Kaj ne senfortigite en fido, li pripensis sian propran
korpon jam pereintan (estante preskaŭ centjara), kaj
la senvivecon de la utero de Sara; 20 tamen pri la
promeso de Dio li ne ŝanceliĝis en nekredemo, sed
fortiĝis per fido, donante la gloron al Dio, 21 kaj plene
certigite, ke tion, kion Li promesis, Li povas ankaŭ
fari. 22 Tial ĝi estis kalkulita al li kiel virto. 23 Kaj ne
por li sola estis skribite, ke ĝi estis kalkulita al li; 24
sed ankaŭ por ni, al kiuj ĝi estos kalkulata, kaj kiuj
kredas al Tiu, kiu levis el la mortintoj Jesuon, nian
Sinjoron, 25 kiu estis transdonita pro niaj pekoj kaj
estis relevita por nia pravigo.

5 Tial ni, pravigite per fido, havu pacon kun Dio per
nia Sinjoro Jesuo Kristo, 2 per kiu ankaŭ ni ricevis
enkondukon per fido en ĉi tiun gracon, en kiu ni
staras; kaj ni ĝoju pro espero de la gloro de Dio. 3
Kaj krome ni ĝoju ankaŭ pro la afliktoj, sciante, ke
aflikto faras paciencon; 4 kaj pacienco provitecon,
kaj proviteco esperon; 5 kaj la espero ne hontigas,
ĉar la amo de Dio estas verŝita en niajn korojn per la
Sankta Spirito, donita al ni. 6 Ĉar kiam ni ankoraŭ
estis senfortaj, tiam Kristo ĝustatempe mortis pro
malpiuloj. 7 Ĉar apenaŭ pro justulo iu mortus; ĉar pro
bonulo eble iu kuraĝus morti. 8 Sed Dio rekomendas
al ni Sian amon en tio, ke dum ni ankoraŭ estis
pekuloj, Kristo mortis por ni. 9 Des plimulte do ni, jam
pravigite per lia sango, estos per li savitaj el la kolero.
10 Ĉar se ni, estante malamikoj, estas repacigitaj kun
Dio per la morto de Lia Filo, des plimulte, repacigite,
ni estos savitaj per lia vivo; 11 kaj krom tio ni fieras
ankaŭ en Dio pro nia Sinjoro Jesuo Kristo, per kiu ni
jam ricevis la repacigon. 12 Pro tio, kiel per unu homo
peko eniris en la mondon, kaj morto per peko, kaj
tiel morto atingis ĉiujn homojn pro tio, ke ĉiuj pekis;
13 ĉar ĝis la leĝo peko estis en la mondo, sed peko
ne estas alkalkulata, kiam ne ekzistas leĝo. 14 Sed
morto reĝis de post Adam ĝis Moseo, eĉ super tiuj,
kiuj ne pekis simile al la transpaŝo de Adam, kiu estis
la tipo de la venonto. 15 Sed ne kia la eraro, tia estas
la donaco. Ĉar se per la eraro de unu mortis la multaj,
des plimulte abundis al la multaj la graco de Dio kaj la
donaco per la graco de la unu homo Jesuo Kristo. 16
Kaj la donaco ne estis laŭ la unu pekinta; ĉar la juĝo
venis el unu ĝis kondamno, sed la donaco venis el
multaj eraroj ĝis pravigo. 17 Ĉar se, per la eraro de la
unu, morto reĝis per unu, des plimulte reĝos en vivo
per la unu Jesuo Kristo tiuj, kiuj ricevis abundon de la
graco kaj de la donaco de justeco. 18 Tial, kiel per
unu eraro venis juĝo al ĉiuj homoj ĝis kondamno, tiel
same per unu justaĵo venis la donaco al ĉiuj homoj
ĝis la pravigo de vivo. 19 Ĉar kiel per la malobeo de
unu la multaj fariĝis pekuloj, tiel per la obeo de unu
la multaj fariĝos justaj. 20 Kaj la leĝo eniris, por ke
la eraro plimultiĝu; sed kie peko plimultiĝis, graco
multe pli superabundis, 21 por ke tiel same, kiel la
peko reĝis en morto, la graco reĝu per justeco ĝis
eterna vivo per Jesuo Kristo, nia Sinjoro. (aiōnios g166)

**6** Kion do ni diru? Ĉu ni restu en peko, por ke graco
abundu? 2 Nepre ne! Ĉu ni, kiuj mortis al la peko,
ankoraŭ vivus en ĝi? 3 Ĉu vi ne scias, ke ni ĉiuj, kiuj
baptiĝis al Jesuo Kristo, baptiĝis al lia morto? 4 Ni do
estas entombigitaj kun li per bapto al morto, por ke,
kiel Kristo estas levita el la mortintoj per la gloro de
la Patro, tiel same ni ankaŭ iradu en noveco de vivo.
5 Ĉar se ni jam kuniĝis al la simileco de lia morto,
ni tiel same kuniĝos al la simileco de lia releviĝo, 6
sciante, ke nia malnova homo estas kun li krucumita,
por ke la korpo de peko estu neniigita, por ke ni jam
ne estu sklavoj al peko; 7 ĉar tiu, kiu mortis, estas
pravigita pri peko. 8 Sed se ni mortis kun Kristo, ni
kredas, ke ni ankaŭ vivos kun li; 9 sciante, ke Kristo,
levite el la mortintoj, ne plu mortas; la morto ne plu
lin regas. 10 Ĉar mortante, li mortis al peko unufoje
por ĉiam; sed vivante, li vivas al Dio. 11 Tial ankaŭ
vi vin kalkulu mortintoj al peko, sed vivantoj al Dio
en Kristo Jesuo. 12 Tial peko ne reĝu en via morta
korpo tiel, ke vi obeu al ĝiaj deziroj; 13 ankaŭ ne
prezentu viajn membrojn iloj de maljusteco al peko,
sed prezentu vin al Dio vivantoj el la mortintoj, kaj
viajn membrojn iloj de justeco por Dio. 14 Ĉar peko ne
regos vin, ĉar vi estas ne sub la leĝo, sed sub graco. 15
Kio do? ĉu ni peku, pro tio, ke ni estas ne sub leĝo,
sed sub graco? Nepre ne! 16 Ĉu vi ne scias, ke kiam vi
vin prezentas, kiel sklavoj al iu por obeado, vi estas
sklavoj de tiu, al kiu vi obeas, ĉu de peko por morto,
aŭ de obeemeco por justeco? 17 Sed danko estu al
Dio, ke kvankam vi estis la sklavoj de peko, vi tamen
fariĝis kore obeemaj al tiu tipo de instruado, al kiu vi
estas kondukitaj; 18 kaj liberigite el peko, vi sklaviĝis
al justeco. 19 Mi parolas home pro la malforteco de
via karno; ĉar kiel vi prezentis viajn membrojn sklavoj
al malpureco kaj al maljusteco ĝis maljusteco, tiel
nun prezentu viajn membrojn sklavoj al justeco ĝis
sanktigo. 20 Ĉar kiam vi estis sklavoj de peko, vi estis
liberaj de justeco. 21 Kian frukton do vi havis tiam
el tio, pri kio vi nun hontas? ĉar la fino de tio estas
morto. 22 Sed nun, liberigite el peko, kaj sklaviĝinte
al Dio, vi havas vian frukton ĝis sanktiĝo, kaj por fino
eternan vivon. **(aiōnios g166)** 23 Ĉar la salajro de peko
estas morto; sed la donaco de Dio estas eterna vivo en
Kristo Jesuo, nia Sinjoro. **(aiōnios g166)**

**7** Aŭ ĉu vi ne scias, fratoj (ĉar mi parolas al konantoj
de la leĝo), ke la leĝo regas la homon tiel longe,
kiel li vivas? 2 Ĉar la edzinigita virino estas leĝe
alligita al sia edzo dum lia vivo; sed se la edzo mortas,
ŝi liberiĝas el la leĝo de la edzo. 3 Se do, dum la
edzo vivas, ŝi kuniĝas kun alia viro, ŝi estos nomata
adultulino; sed se la edzo mortis, ŝi estas libera de la
leĝo, kaj ne estas adultulino, kvankam kuniĝinte kun
alia viro. 4 Tiel, miaj fratoj, vi same mortis al la leĝo
per la korpo de Kristo, por kuniĝi kun alia, nome kun
tiu, kiu leviĝis el la mortintoj, por ke ni donu frukton
al Dio. 5 Ĉar dum ni estis en karno, la laŭpekaj pasioj,
kiuj estis per la leĝo, energiis en niaj membroj, por
doni frukton al morto. 6 Sed ni jam liberiĝis el la leĝo,
mortinte rilate tion, en kio ni estis tenataj, por ke ni
servu en noveco de spirito, kaj ne en malnoveco de
litero. 7 Kion do ni diru? Ĉu la leĝo estas peko? Nepre
ne! Tamen mi ne konus pekon, krom per la leĝo; ĉar
mi ne konus deziron, se la leĝo ne dirus: Ne deziru; 8
sed la peko, trovante pretekston, estigis en mi per la
ordono ĉian deziremon, ĉar ekster leĝo la peko estas
senviva. 9 Kaj iam mi vivadis ekster la leĝo; sed kiam
la ordono venis, la peko viviĝis, kaj mi mortis; 10 kaj
tiun ordonon, kiu estas por vivo, mi trovis por morto;
11 ĉar la peko, trovinte pretekston, per la ordono
min trompis, kaj per ĝi min mortigis. 12 Tiel la leĝo
estas sankta, kaj la ordono estas sankta kaj justa kaj
bona. 13 Ĉu do tio, kio estas bona, fariĝis morto por
mi? Nepre ne! Sed la peko, por ke ĝi montriĝu peko,
estigante morton en mi per la bono — por ke per la
ordono la peko fariĝu treege peka. 14 Ĉar ni scias, ke
la leĝo estas spirita; sed mi estas karna, vendite sub
pekon. 15 Ĉar mi ne havas certecon pri tio, kion mi
faradas; ĉar mi ne agas laŭ tio, kion mi volas; sed kion
mi malamas, tion mi faras. 16 Sed se mi faras tion,
kion mi ne volas fari, mi konsentas al la leĝo, ke ĝi
estas bona. 17 La faranto do estas jam ne mi, sed la
peko, loĝanta en mi. 18 Ĉar mi scias, ke en mi (tio
estas, en mia karno) bono ne loĝas; ĉar ĉe mi estas
la volo, sed ne la elfaro de la bono. 19 Ĉar la bonon,
kiun mi volas fari, mi ne faras; sed la malbonon, kiun
mi ne volas fari, mi faradas. 20 Sed se mi faras tion,
kion mi ne volas fari, faras ĝin jam ne mi, sed la peko,
loĝanta en mi. 21 Mi do trovas leĝon, ke kiam mi volas
fari bonon, la malbono estas ĉe mi. 22 Ĉar mi ĝojas en
la leĝo de Dio laŭ la interna homo; 23 sed mi vidas
alian leĝon en miaj membroj, militantan kontraŭ la
leĝo de mia menso, kaj forkaptantan min sub la leĝon
de la peko, kiu estas en miaj membroj. 24 Ho ve, mi

malfeliĉulo! kiu min liberigos el la korpo de ĉi tiu
morto? 25 Danko estu al Dio, per Jesuo Kristo, nia
Sinjoro. Per la menso do mi mem servas al la leĝo de
Dio, sed per la karno al la leĝo de peko.

8 Ekzistas do jam nenia kondamno kontraŭ tiuj, kiuj
estas en Kristo Jesuo. 2 Ĉar la leĝo de la Spirito de
vivo en Kristo Jesuo liberigis min de la leĝo de peko
kaj morto. 3 Ĉar kiam la leĝo troviĝis nekapabla pro
tio, ke ĝi estis malforta pro la karno, Dio, sendante
Sian propran Filon en simileco de peka karno kaj pro
peko, kondamnis la pekadon en la karno; 4 por ke
la postulo de la leĝo plenumiĝu en ni, kiuj iradas ne
laŭ la karno, sed laŭ la spirito. 5 Ĉar kiuj estas laŭ la
karno, tiuj sin interesas pri la aferoj de la karno; sed
kiuj estas laŭ la spirito, pri la aferoj de la spirito. 6 Ĉar
la intereso de la karno estas morto, sed la intereso de
la spirito estas vivo kaj paco; 7 ĉar la intereso de la
karno estas malamikeco kontraŭ Dio, ĉar ĝi ne obeas
al la leĝo de Dio, kaj ĝi ja ne povas obei; 8 kaj tiuj, kiuj
estas en la karno, ne povas plaĉi al Dio. 9 Sed vi estas
ne en la karno, sed en la spirito, se vere la Spirito
de Dio loĝas en vi. Sed se iu ne havas la Spiriton de
Kristo, tiu ne estas lia. 10 Kaj se Kristo estas en vi, la
korpo malvivas pro peko, sed la spirito estas vivo pro
justeco. 11 Kaj se la Spirito de Tiu, kiu levis Jesuon el
la mortintoj, loĝas en vi, tiam la Levinto de Kristo
Jesuo el la mortintoj vivigos eĉ viajn mortajn korpojn
per Sia Spirito, loĝanta en vi. 12 Tial do, fratoj, ni estas
ŝuldantoj, ne al la karno, por vivi laŭ la karno; 13 ĉar
se vi vivas laŭ la karno, vi mortos; sed se per la spirito
vi malvivigas la farojn de la korpo, vi vivos. 14 Ĉar ĉiuj,
kiuj estas kondukataj de la Spirito de Dio, estas filoj de
Dio. 15 Ĉar vi ne ricevis la spiriton de sklaveco denove
al timo; sed vi ricevis la spiriton de adopto, per kiu
ni krias: Aba, Patro. 16 La Spirito mem kunatestas
kun nia spirito, ke ni estas idoj de Dio; 17 kaj se idoj,
tial heredantoj, heredantoj de Dio, kunheredantoj
kun Kristo, se vere ni suferas kun li, por ke ni estu
glorataj kun li. 18 Ĉar mi kalkulas, ke la suferoj de
la nuna tempo ne indas komparon kun la gloro, kiu
estas malkaŝota al ni. 19 Ĉar la fervora sopiro de la
kreitaro atendas la malkaŝon de la filoj de Dio. 20
Ĉar la kreitaro subiĝis sub la vanecon, ne volonte,
sed, pro la subiganto, kun espero, 21 ke la kreitaro
mem ankaŭ liberiĝos el la sklaveco de pereo en la
liberecon de la gloro de la idoj de Dio. 22 Ĉar ni scias,
ke la tuta kreitaro kune ĝemas kaj naskodoloras ĝis
nun. 23 Kaj krom tio, ni mem, kiuj havas la unuaaĵon
de la Spirito, ĝemas en ni, atendante nian adopton,
nome la elaĉeton de nia korpo. 24 Ĉar per espero ni
estas savitaj; sed la espero, kiu estas vidata, ne estas
espero; ĉar kiu esperas al tio, kion li vidas? 25 Sed, se
ni esperas al tio, kion ni ne vidas, tiam ni ĝin atendas
pacience. 26 Kaj tiel same la Spirito ankaŭ helpas nian
malfortecon; ĉar ni ne scias, kiel preĝi dece, sed la
Spirito mem propetadas por ni per ĝemoj neeldireblaj;
27 kaj Tiu, kiu esploras la korojn, scias, kio estas la
penso de la Spirito, ĉar li propetadas por la sanktuloj
laŭ la volo de Dio. 28 Kaj ni scias, ke por tiuj, kiuj
amas Dion, por tiuj, kiuj estas vokitaj laŭ Lia intenco,
ĉio kunlaboras al bono. 29 Ĉar kiujn Li antaŭkonis,
tiujn Li antaŭdifinis kiel konformajn al la bildo de Lia
Filo, por ke ĉi tiu estu la unuenaskita inter multaj
fratoj; 30 kaj kiujn Li antaŭdifinis, tiujn Li ankaŭ vokis;
kaj kiujn Li vokis, tiujn Li ankaŭ justigis; kaj kiujn Li
justigis, tiujn Li ankaŭ gloris. 31 Kion do ni diru pri ĉi
tio? Se Dio estas por ni, kiu estas kontraŭ ni? 32 Ĉu
Tiu, kiu ne indulgis Sian propran Filon, sed fordonis
lin por ni ĉiuj, ne donos al ni libere ĉion kun li? 33 Kiu
akuzos la elektitojn de Dio? Dio estas la justiganto;
34 kiu estas la kondamnanto? Kristo estas tiu, kiu
mortis, sed leviĝis el la mortintoj, kiu estas dekstre de
Dio, kaj ankaŭ propetadas por ni. 35 Kiu apartigos
nin de la amo de Kristo? ĉu aflikto, aŭ turmento, aŭ
persekutado, aŭ malsato, aŭ nudeco, aŭ danĝero, aŭ
glavo? 36 Kiel estas skribite: Pro Vi ni estas mortigataj
ĉiutage; Oni rigardas nin kiel ŝafojn por buĉo. 37 Sed
en ĉio tio ni supervenkas per tiu, kiu nin amis. 38 Ĉar
mi konvinkiĝis, ke nek morto, nek vivo, nek anĝeloj,
nek aŭtoritatoj, nek estantaĵoj, nek estontaĵoj, nek
potencoj, 39 nek alteco, nek profundeco, nek iu alia
kreitaĵo povos apartigi nin de la amo de Dio, kiu estas
en Kristo Jesuo, nia Sinjoro.

9 Mi diras la veron en Kristo, mi ne mensogas, kaj mia
konscienco atestas kun mi per la Sankta Spirito, 2
ke mi havas grandan malĝojon kaj senĉesan doloron
en la koro. 3 Ĉar mi volus, ke mi estu anatemita for de
Kristo por miaj fratoj, miaj parencoj laŭ la karno; 4
kiuj estas Izraelidoj, kies estas la adopto kaj la gloro
kaj la interligoj kaj la leĝdono kaj la Diservo kaj la
promesoj; 5 kies estas la patroj, kaj el kiuj laŭ la karno
estas Kristo, kiu estas super ĉiuj, Dio benata eterne.

Amen. (aiōn g165) 6 Sed la afero ne estas, kvazaŭ la vorto
de Dio estus neniiĝinta. Ĉar ne ĉiuj estas Izrael, kiuj
estas el Izrael; 7 nek, ĉar ili estas idoj de Abraham, ĉiuj
estas filoj, sed: Per Isaak oni nomos vian idaron. 8 Tio
estas, ne la filoj de la karno estas la filoj de Dio, sed la
filoj de la promeso estas rigardataj kiel idaro. 9 Ĉar
jen estas la vorto de promeso: En la sama jartempo
Mi venos, kaj estos filo ĉe Sara. 10 Kaj plue, kiam
Rebeka ankaŭ gravediĝis per unu, nia patro Isaak
11 (ĉar la infanoj ankoraŭ ne naskiĝis, nek faris ion
bonan aŭ malbonan, por ke la intenco de Dio restu
laŭ elekto, ne pro faroj, sed pro la alvokanto), 12 estis
dirite al ŝi: La pli granda servos la malpli grandan. 13
Kiel estas skribite: Mi ekamis Jakobon, sed Esavon Mi
malamis. 14 Kion do ni diru? Ĉu estas maljusteco ĉe
Dio? Nepre ne! 15 Ĉar Li diris al Moseo: Mi favorkoros
tiun, kiun Mi favorkoros, kaj Mi kompatos tiun, kiun
Mi kompatos. 16 Tial do tio apartenas ne al tiu, kiu
volas, nek al tiu, kiu kuras, sed al Dio, kiu kompatas.
17 Ĉar la Skribo diras al Faraono: Nur por tio Mi vin
konservis, ke Mi montru sur vi Mian forton, kaj por
ke oni rakontu pri Mia nomo sur la tuta tero. 18
Tial Li favorkoras ĉiun, kiun Li volas; kaj ĉiun, kiun
Li volas, Li obstinigas. 19 Vi do diras al mi: Kial Li
ankoraŭ riproĉas? Ĉar kiu rezistas al Lia volo? 20
Sed antaŭ tio, ho viro, kiu vi estas, ke vi respondas
kontraŭ Dio? Ĉu faritaĵo diros al sia farinto: Kial vi
faris min tiel? 21 Aŭ ĉu la potfaristo ne havas rajton
super la argilo, el la sama maso fari jen vazon por
honoro, kaj jen vazon por malhonoro? 22 Kiel do,
se Dio, volante elmontri Sian koleron kaj konatigi
Sian potencon, toleris kun plena pacienco vazojn de
kolero, taŭgajn por pereo; 23 kaj por ke Li konatigu
la riĉon de Sia gloro sur vazojn de favoro, kiujn Li
antaŭe pretigis por gloro, 24 nome nin, kiujn Li ankaŭ
vokis, ne nur el la Judoj, sed ankaŭ el la nacianoj? 25
Kiel Li diras ankaŭ en Hoŝea: La popolon ne Mian Mi
nomos Mia popolo, Kaj la neamatinon amatino. 26 Kaj
sur la sama loko, kie estis al ili dirite: Vi ne estas Mia
popolo, Tie oni nomos ilin infanoj de la vivanta Dio.
27 Kaj Jesaja krias pri Izrael: Se la nombro de la filoj
de Izrael eĉ estos kiel la apudmara sablo, la restintoj
saviĝos; 28 ĉar la Sinjoro efektivigos Sian vorton en la
mondo, akcelante kaj tranĉe mallongigante ĝin. 29
Kiel Jesaja diris antaŭe: Se la Eternulo Cebaot ne lasus
al ni restaĵon, Ni fariĝus kiel Sodom, ni similiĝus al
Gomora. 30 Kion do ni diru? Ke la nacianoj, kiuj ne
sekvis justecon, atingis justecon, la justecon, kiu estas
el fido; 31 sed ke Izrael, sekvante la leĝon de justeco,
ne atingis tiun leĝon. 32 Kial? Ĉar ili sekvis ĝin ne per
fido, sed kvazaŭ per faroj. Ili falpuŝiĝis ĉe la ŝtono de
falpuŝiĝo; 33 kiel estas skribite: Jen Mi kuŝigas en Cion
ŝtonon de falpuŝiĝo kaj rokon de alfrapiĝo; Kaj tiu,
kiu fidos al li, ne estos hontigita.

10 Fratoj, la deziro de mia koro kaj mia preĝo al
Dio pri ili estas por ilia savado. 2 Ĉar mi atestas
pri ili, ke ili havas fervoron al Dio, sed ne laŭ scio. 3
Ĉar nesciante la justecon de Dio, kaj penante starigi
sian propran justecon, ili ne subiĝis al la justeco de
Dio. 4 Ĉar Kristo estas la fino de la leĝo por justeco
por ĉiu, kiu kredas. 5 Ĉar Moseo skribis, ke tiu, kiu
plenumas la justecon de la leĝo, vivos per ĝi. 6 Sed
la justeco, kiu estas el fido, diras jene: Ne diru en
via koro: Kiu suprenirus en la ĉielon? (tio estas, por
malsuprenigi Kriston), 7 nek: Kiu malsuprenirus en la
abismon? (tio estas, por suprenkonduki Kriston el la
mortintoj). (Abyssos g12) 8 Sed kion ĝi diras? La afero
estas proksime de vi, en via buŝo kaj en via koro; tio
estas, la vorto de fido, kiun ni predikas; 9 ĉar se vi per
via buŝo konfesas Jesuon Sinjoro, kaj kredas en via
koro, ke Dio lin levis el la mortintoj, vi saviĝos; 10
ĉar per la koro la homo kredas ĝis justeco, kaj per
la buŝo konfesas ĝis savo. 11 Ĉar la Skribo diras: Ĉiu,
kiu fidas al li, ne estos hontigita. 12 Ĉar estas nenia
diferencigo inter Judo kaj Greko, ĉar unu sama estas
Sinjoro de ĉiuj, kaj estas riĉa por ĉiuj, kiuj lin vokas;
13 ĉar: Ĉiu, kiu vokos la nomon de la Eternulo, saviĝos.
14 Kiel do ili vokos Tiun, al kiu ili ne kredis? kaj kiel ili
kredos al Tiu, pri kiu ili ne aŭdis? kaj kiel ili aŭdos
sen predikanto? 15 kaj kiel oni predikos, se ili ne
estos senditaj? kiel estas skribite: Kiel ĉarmaj estas la
piedoj de la anoncantoj de la evangelio de bono! 16
Sed ne ĉiuj aŭskultis la evangelion. Ĉar Jesuo diris:
Ho Eternulo! kiu kredus al tio, kion ni aŭdis? 17 La
fido venas do per aŭdado, kaj aŭdado per la vorto de
Kristo. 18 Sed mi diras: Ĉu ili ne aŭdis? Certe: Tra la
tuta mondo iris ilia sono, Kaj ĝis la finoj de la tero
iris iliaj vortoj. 19 Sed mi diras: Ĉu Izrael ne sciis?
Unue Moseo diris: Mi incitos vin per ne-popolo, Per
popolo malnobla Mi vin kolerigos. 20 Kaj Jesaja estis
tre kuraĝa, kaj diris: Mi estas trovebla por tiuj, kiuj
Min ne serĉis; Mi montris Min al tiuj, kiuj pri Mi ne

demandis. 21 Sed pri Izrael li diris: Ĉiutage Mi etendis
Miajn manojn al popolo malobeema kaj obstina.

11 Mi do diras: Ĉu Dio forpuŝis Sian popolon? Nepre
ne! Ĉar ankaŭ mi estas Izraelido, el la idoj de
Abraham, el la tribo de Benjamen. 2 Dio ne forpuŝis
Sian popolon, kiun Li antaŭkonis. Aŭ ĉu vi ne scias,
kion la Skribo diras pri Elija? kiel li pledis ĉe Dio
kontraŭ Izrael: 3 Ho Eternulo, oni mortigis Viajn
profetojn, detruis Viajn altarojn; kaj mi sola restis,
kaj oni serĉas mian animon. 4 Sed kion diras al li la
orakolo de Dio? Mi restigis por Mi sep mil virojn, kies
genuoj ne fleksiĝis antaŭ Baal. 5 Tiel same do estas
ankaŭ nuntempe restaĵo laŭ la elektado de graco. 6
Sed se per graco, ne plu el faroj; alie graco jam ne
estus graco. 7 Kion do? Kion Izrael serĉadas, tion li
ne atingis, sed la elektitaro atingis ĝin, kaj la restaĵo
estis obstinigita; 8 kiel estas skribite: Dio donis al ili
spiriton de profunda dormo, okulojn, por ke ili ne
vidu, kaj orelojn, por ke ili ne aŭdu, ĝis la nuna tago. 9
Kaj David diris: Ilia tablo fariĝu por ili reto kaj kaptilo
Kaj falpuŝilo kaj repago; 10 Mallumiĝu iliaj okuloj, ke
ili ne vidu; Kaj iliajn lumbojn malfortigu por ĉiam. 11
Mi do diras: Ĉu ili falpuŝiĝis, por ke ili falu? Nepre ne!
sed per ilia eraro venis savo al la nacianoj, por ĵaluzigi
ilin. 12 Se do ilia eraro riĉigis la mondon, kaj ilia perdo
estas la gajno de la nacianoj, kiom pli ilia pleneco? 13
Sed mi parolas al vi, nacianoj. Laŭ tio, kiom mi estas
apostolo al nacianoj, mi gloras mian servadon; 14 se
nur mi iel povos ĵaluzigi tiujn, kiuj estas mia karno,
kaj savi kelkajn el ili. 15 Ĉar se la forĵetado de ili estas
la repacigo de la mondo, kio estos la akcepto de ili,
se ne vivo el la mortintoj? 16 Kaj se la unuaaĵo estas
sankta, la maso ankaŭ estas sankta; kaj se la radiko
estas sankta, la branĉoj ankaŭ estas sanktaj. 17 Sed se
kelkaj el la branĉoj derompiĝis, kaj vi, estante sovaĝa
olivarbo, engreftiĝis inter ili kaj fariĝis partoprenanto
en la radiko kaj graso de la olivarbo, 18 ne fieru
super la branĉoj; sed se vi fieras, ne vi portas la
radikon, sed la radiko portas vin. 19 Vi do diros:
Branĉoj estis derompitaj, por ke mi estu engreftita.
20 Bone; pro nekredemeco ili estis derompitaj, kaj
vi staras per via fido. Ne tenu vin alte, sed timu;
21 ĉar se Dio ne indulgis la naturajn branĉojn, Li
ankaŭ vin ne indulgos. 22 Vidu do la bonecon kaj
severecon de Dio: al la falintoj severecon, sed al vi
bonecon, se vi restados en Lia boneco; alie vi ankaŭ
detranĉiĝos. 23 Kaj ili ankaŭ, se ili ne restados en sia
nekredemeco, engreftiĝos; ĉar Dio povas reengrefti
ilin. 24 Ĉar se vi eltranĉiĝis el tio, kio estas nature
sovaĝa olivarbo, kaj kontraŭnature engreftiĝis en
bonan olivarbon, kiom pli ĉi tiuj, kiuj estas la naturaj
branĉoj, engreftiĝos en sian propran olivarbon? 25
Ĉar mi ne volas, fratoj, ke vi ne sciu ĉi tiun misteron,
por ke vi ne opiniu vin saĝaj, ke laŭparta obstiniĝo
okazis al Izrael, ĝis la pleneco de la nacianoj envenos;
26 kaj tiamaniere la tuta Izrael saviĝos, kiel estas
skribite: El Cion venos la Liberiganto; Li deturnos
de Jakob malpiecon; 27 Kaj ĉi tio estos Mia interligo
kun ili, Kiam Mi forigos iliajn pekojn. 28 Rilate al
la evangelio, ili estas malamikoj pro vi; sed rilate
al la elekto, ili estas amataj pro la patroj. 29 Ĉar la
donacoj kaj la vokado de Dio estas nerevokeblaj. 30
Ĉar kiel vi iam estis malobeemaj al Dio, sed jam ricevis
kompaton per ilia malobeo, 31 tiel same ankaŭ ĉi tiuj
jam malobeis, por ke, per la kompato montrita al vi,
ili ankaŭ nun ricevu kompaton. 32 Ĉar Dio kunŝlosis
ĉiujn en malobeo, por ke Li kompatu ĉiujn. (eleēsē g1653)
33 Ho, profundo de riĉeco kaj saĝeco kaj scio de Dio!
kiel neesploreblaj estas Liaj juĝoj, kaj nesekveblaj Liaj
vojoj! 34 Ĉar kiu sciis la spiriton de la Eternulo? aŭ kiu
estis Lia konsilanto? 35 aŭ kiu antaŭe al Li donis ion,
poste redonotan al li? 36 Ĉar el Li kaj per Li kaj al Li
estas ĉio. Al Li estu la gloro por ĉiam. Amen. (aiōn g165)

12 Mi do vin petas, fratoj, pro la kompatoj de Dio, ke
vi prezentu viajn korpojn kiel vivantan oferon,
sanktan, plaĉantan al Dio, kio estas via racia servo. 2
Kaj ne konformiĝu al ĉi tiu mondo; sed aliformiĝu
per renovigado de via menso, por ke vi provu, kio
estas la bona kaj aprobinda kaj perfekta volo de Dio.
(aiōn g165) 3 Ĉar mi diras al ĉiu el vi, per la graco
al mi donita, ke li ne tro estimu sin, sed estimu
sin kun moderecο, laŭ mezuro de la fido, kiun Dio
disdonis al ĉiu. 4 Ĉar kiel ni havas multajn membrojn
en unu korpo, kaj ne ĉiuj membroj havas la saman
funkcion, 5 tiel same ni multaj estas unu korpo en
Kristo, kaj ĉiuj aparte membroj unu de alia. 6 Sed
havante donacojn diversajn laŭ la graco donita al ni,
ĉu profetadon, ni profetu laŭ la mezuro de nia fido; 7
aŭ servadon, ni laboru en nia servado; aŭ instruanto,
en sia instruado; 8 aŭ admonanto, en sia admonado;
la disdonanto agu malavare, la administranto kun
diligenteco, la kompatanto kun ĝojo. 9 Via amo estu

sen hipokriteco. Abomenu tion, kio estas malbona;
algluiĝu al la bona. 10 En fratamo estu kore unuigitaj
unu al alia, honore preferantaj unu la alian; 11 en
diligenteco ne malviglaj, en spirito fervoraj, servantaj
la Sinjoron; 12 en espero ĝojaj, en aflikto paciencaj, en
preĝado persistaj; 13 kotizantaj por la bezonoj de la
sanktuloj, sekvantaj gastamecon. 14 Benu tiujn, kiuj
vin persekutas; benu, kaj ne malbenu. 15 Ĝoju kun
ĝojantoj, ploru kun plorantoj. 16 Estu simpatiaj unu al
alia. Ne pripensadu altajn aferojn, sed klinadu vin
al humilaj aferoj. Ne opiniu vin saĝaj. 17 Redonu al
neniu malbonon pro malbono. Celu aprobindaĵojn
antaŭ ĉiuj homoj. 18 Se estos eble, restu pacaj viaparte
kun ĉiuj homoj. 19 Ne venĝu vin, amataj, sed cedu
lokon al kolero; ĉar estas skribite: Ĉe Mi estas venĝo,
Mi repagos, diras la Sinjoro. 20 Sed se via malamiko
malsatas, donu al li manĝi; se li soifas, donu al li
trinki; ĉar tion farante, fajrajn karbojn vi kolektos
sur lia kapo. 21 Ne venkiĝu de malbono, sed venku
malbonon per bono.

13 Ĉiu animo submetiĝu al la superaj aŭtoritatoj,
ĉar ne ekzistas aŭtoritato, krom de Dio; kaj tiuj,
kiuj ekzistas, estas starigitaj de Dio. 2 Tiu do, kiu
kontraŭstaras al aŭtoritato, rezistas al la ordono de
Dio; kaj tiuj, kiuj rezistas, ricevos juĝon. 3 Ĉar regantoj
estas teruraĵo ne al la bona agado, sed al la malbona.
Ĉu vi volas ne timi aŭtoritatulon? faru bonon, kaj vi
havos de li laŭdon; 4 ĉar li estas servanto de Dio al
vi por bono. Sed timu, se vi faras malbonon; ĉar ne
vane li portas la glavon, ĉar li estas servanto de Dio,
venĝanto por kolero kontraŭ tiu, kiu faras malbonon.
5 Sekve estas necese submetiĝi, ne nur pro la kolero,
sed ankaŭ pro konscienco. 6 Ĉar pro tio vi ankaŭ pagas
tributon, ĉar ili estas servantoj de Dio, klopodantaj
por ĉi tio mem. 7 Redonu ŝuldon al ĉiuj: tributon, al
kiu tributo estas ŝuldata; imposton, al kiu imposto;
timon, al kiu timo; honoron, al kiu honoro. 8 Al neniu
ŝuldu ion, krom la reciproka amo; ĉar amante sian
proksimulon, oni plenumis la ceteran leĝon. 9 Ĉar tio:
Ne adultu, Ne mortigu, Ne ŝtelu, Ne deziru, kaj ĉiu alia
ordono, estas resumitaj en la jena parolo: Amu vian
proksimulon kiel vin mem. 10 Amo ne faras malbonon
al proksimulo; amo do estas la plenumado de la leĝo.
11 Kaj tion faru, sciante la ĝustan tempon, ke nun estas
la horo por leviĝo el dormo; ĉar nun nia savo estas pli
proksima, ol kiam ni ekkredis. 12 La nokto jam finiĝas,
kaj la tago alproksimiĝas; ni demetu do la farojn de
mallumo kaj surmetu la armilojn de lumo. 13 Ni iradu
dece, kiel en la tago, ne en diboĉado kaj drinkado, nek
en volupto kaj senbrideco, nek en malpaco kaj ĵaluzo.
14 Sed surmetu la Sinjoron Jesuo Kristo, kaj ne sekvu
la intencojn de la karno al voluptoj.

14 Sed akceptu malfortulon en fido, tamen ne por
dubaj disputadoj. 2 Unu homo kredas, ke li
povas ĉion manĝi; sed alia, estante malforta, manĝas
legomojn. 3 Kiu manĝas, tiu ne malestimu tiun, kiu
ne manĝas; kaj kiu ne manĝas, tiu ne juĝu tiun, kiu
manĝas; ĉar Dio lin akceptis. 4 Kiu estas vi, ke vi juĝas
la servanton de alia? antaŭ sia propra sinjoro li staras
aŭ falas. Li ja estos starigita, ĉar la Sinjoro povas lin
starigi. 5 Unu juĝas unu tagon pli alte ol alian, alia
egale juĝas ĉiun tagon. Ĉiu homo konvinkiĝu en sia
menso. 6 Kiu observas la tagon, tiu observas ĝin al
la Sinjoro; kaj la manĝanto manĝas al la Sinjoro, ĉar
li dankas Dion; kaj la nemanĝanto nemanĝas al la
Sinjoro, kaj li dankas Dion. 7 Ĉar neniu el ni vivas al si
mem, kaj neniu mortas al si mem. 8 Ĉar se ni vivas,
ni vivas al la Sinjoro, kaj se ni mortas, ni mortas al
la Sinjoro; ĉu ni vivas do, aŭ mortas, al la Sinjoro ni
apartenas. 9 Ĉar por tio Kristo mortis kaj viviĝis, por
esti Sinjoro de la mortintoj kaj de la vivantoj. 10 Sed
vi, kial vi juĝas vian fraton? kaj vi, kial vi malestimas
vian fraton? ĉar ni ĉiuj staros antaŭ la tribunala seĝo
de Dio. 11 Ĉar estas skribite: Kiel Mi vivas, diras la
Eternulo, antaŭ Mi kliniĝos ĉiu genuo, Kaj ĉiu lango
gloros Dion. 12 Tial do ĉiu el ni respondos al Dio pri si
mem. 13 Tial ni ne plu juĝu unu alian; sed prefere ni
juĝu, ke neniu metu en la vojo de sia frato faligilon
aŭ ian ofendilon. 14 Mi scias, kaj konvinkiĝis en la
Sinjoro Jesuo, ke nenio estas malpura per si; sed por
tiu, kiu opinias ion malpura, ĝi estas malpura. 15 Ĉar
se pro manĝaĵo via frato ĉagreniĝas, vi jam ne iradas
en amo. Ne pereigu per via manĝaĵo tiun, por kiu
Kristo mortis. 16 Via bono do ne estu kalumniita; 17
ĉar la regno de Dio estas ne manĝado kaj trinkado,
sed justeco kaj paco kaj ĝojo en la Sankta Spirito.
18 Ĉar tiu, kiu en tio servas Kriston, plaĉas al Dio,
kaj estas aprobata de homoj. 19 Ni do celu tion, kio
apartenas al paco kaj al reciproka edifo. 20 Ne detruu
pro manĝaĵo la faron de Dio. Ĉio estas ja pura; sed
estas malbone por tiu, kiu manĝas kun ofendo. 21
Estas bone ne manĝi viandon, nek trinki vinon, nek

fari ion, per kio via frato ofendiĝas. 22 Tiun fidon,
kiun vi havas, havu por vi mem antaŭ Dio. Feliĉa estas
tiu, kiu ne juĝas sin mem per tio, kion li aprobas. 23
Sed tiu, kiu estas sendecida, estas kondamnita, se li
manĝas; ĉar li manĝas ne el fido, kaj ĉio, kio ne estas
el fido, estas peko.

**15** Ni, kiuj estas fortaj, devas porti la malfortaĵojn
de la nefortaj, kaj ne plaĉi al ni mem. 2 Ĉiu el
ni plaĉu al sia proksimulo per tia bono, kia taŭgas,
por edifi. 3 Ĉar Kristo ankaŭ ne plaĉis al si mem, sed,
kiel estas skribite: La insultoj de Viaj insultantoj falis
sur min. 4 Ĉar ĉio, kio estas antaŭe skribita, estas
skribita por nia instruado, por ke per pacienco kaj
per konsolo de la Skriboj ni havu esperon. 5 Kaj la Dio
de pacienco kaj konsolo donu al vi, ke vi simpatiu
unu kun alia laŭ Kristo Jesuo; 6 por ke vi unuanime
per unu voĉo gloru la Dion kaj Patron de nia Sinjoro
Jesuo Kristo. 7 Tial akceptu unu la alian, kiel ankaŭ
Kristo akceptis vin, al la gloro de Dio. 8 Ĉar mi diras,
ke Kristo fariĝis servanto al la cirkumcidularo pro la
vereco de Dio, por konfirmi la promesojn al la patroj,
9 kaj ke la nacianoj pro lia kompato gloru Dion, kiel
estas skribite: Tial mi gloros Vin inter la popoloj,
Kaj pri Via nomo mi kantos. 10 Kaj ankaŭ oni diras:
Ĝoju, ho gentoj, kun Lia popolo. 11 Kaj ankaŭ: Gloru
la Eternulon ĉiuj popoloj, Kaj laŭdu Lin ĉiuj gentoj.
12 Kaj ankaŭ Jesaja diras: Estos radiko de Jiŝaj, Kaj la
stariĝanto por regi la naciojn. Al li celados la nacioj.
13 Kaj la Dio de espero plenigu vin per ĉia ĝojo kaj
paco en kredado, por ke vi abunde havu esperon, laŭ
la potenco de la Sankta Spirito. 14 Kaj, ho miaj fratoj,
mi mem konvinkiĝis pri vi, ke vi mem estas plenaj
de boneco, plenigitaj per ĉia sciado, kaj kapablaj
admoni unu la alian. 15 Tamen mi iom pli kuraĝe
skribas al vi, kvazaŭ rememorigante vin per la graco,
donita al mi de Dio, 16 ke mi estu servanto de Kristo
Jesuo al la nacianoj, solenanta la evangelion de Dio,
por ke la oferado de la nacianoj fariĝu akceptebla,
sanktigite de la Sankta Spirito. 17 Mi povas do fieri en
Kristo Jesuo pri tio, kio rilatas al Dio. 18 Ĉar mi ne
kuraĝos priparoli ion, krom tio, kion Kristo faris per
mi, por obeigi la nacianojn, vorte kaj fare, 19 en la
potenco de signoj kaj mirindaĵoj, en la potenco de la
Sankta Spirito; tiel, ke de Jerusalem kaj ĉirkaŭe ĝis
Iliriko mi plene predikis la evangelion de Kristo; 20
jenon ambiciante: tiel prediki la evangelion, ne tie,
kie Kristo jam estis priparolita, ke mi ne konstruu sur
la fundamento de alia; 21 sed kiel estas skribite: Vidos
tiuj, al kiuj ne estis dirite pri li, Kaj komprenos tiuj,
kiuj ne aŭdis. 22 Pro tio ankaŭ mi ofte estis malhelpita
veni al vi; 23 sed jam ne havante lokon en ĉi tiuj
regionoj, kaj dum multe da jaroj sopirante veni al vi,
24 kiam mi veturos al Hispanujo, mi venos al vi (ĉar
mi esperas vin viziti travojaĝante, kaj esti helpata
de vi sur la vojo, se antaŭe mi estos sufiĉe gastinta
ĉe vi); 25 sed nun mi veturas al Jerusalem, farante
servon al la sanktuloj. 26 Ĉar Makedonujo kaj la Aĥaja
lando volonte decidis fari monoferon por la neriĉaj
sanktuloj en Jerusalem. 27 Volonte ili decidis, estante
iliaj ŝuldantoj. Ĉar se la nacianoj partoprenas en iliaj
spiritaj aferoj, tiuj siavice devas servi al ili ankaŭ
en materiaj aferoj. 28 Tial, plenuminte ĉi tion, kaj
sigelinte por ili ĉi tiun frukton, mi ekiros Hispanujon,
kaj vizitos vin survoje. 29 Kaj mi scias, ke venante al
vi, mi venos en la pleneco de la beno de Kristo. 30
Sed mi petas vin, fratoj, pro nia Sinjoro Jesuo Kristo
kaj pro la amo de la Spirito, ke vi kunluktu kun mi
en viaj preĝoj al Dio pro mi; 31 ke mi liberiĝu de la
malobeemuloj en Judujo, kaj ke mia servo al Jerusalem
estu akceptebla al la sanktuloj; 32 por ke mi venu ĝoje
al vi per la volo de Dio kaj trovu ripozon ĉe vi. 33 Kaj
la Dio de paco estu kun vi ĉiuj. Amen.

**16** Mi rekomendas al vi nian fratinon Febe, kiu
estas diakonino de la eklezio en Kenkrea; 2
por ke vi akceptu ŝin en la Sinjoro, kiel konvenas al
sanktuloj, kaj ke vi helpu ŝin, en ĉiuj aferoj, pri kiuj ŝi
bezonos vin; ĉar ŝi ankaŭ estis helpantino de multaj,
kaj de mi mem. 3 Salutu Priskilan kaj Akvilan, miajn
kunlaborantojn en Kristo Jesuo, 4 kiuj pro mia vivo
riskis siajn kolojn; ilin dankas ne nur mi, sed ankaŭ
ĉiuj eklezioj de la nacianoj; 5 kaj salutu la eklezion en
ilia domo. Salutu mian amatan Epajneton, kiu estas
la unuaaĵo de Azio por Kristo. 6 Salutu Marian, kiu
multe laboris por vi. 7 Salutu Andronikon kaj Junion,
miajn parencojn kaj miajn kunkaptitojn, kiuj estas
konataj inter la apostoloj, kaj ankaŭ estis en Kristo
antaŭ ol mi. 8 Salutu Ampliason, mian amaton en la
Sinjoro. 9 Salutu Urbanon, nian kunlaboranton por
Kristo, kaj mian amatan Staĥison. 10 Salutu Apeleson,
la aprobitan en Kristo. Salutu tiujn, kiuj estas ĉe
Aristobulo. 11 Salutu mian parencon Herodion. Salutu
tiujn ĉe Narkiso, kiuj estas en la Sinjoro. 12 Salutu

Trifajnan kaj Trifosan, kiuj laboras en la Sinjoro.
Salutu Persison, la virinon amatan, kiu multe laboris
en la Sinjoro. 13 Salutu Rufon, elektitan de la Sinjoro,
kaj lian kaj mian patrinon. 14 Salutu Asinkriton,
Flegonon, Hermeson, Patrobason, Hermason, kaj la
fratojn ĉe ili. 15 Salutu Filologon kaj Julian, Nereon
kaj lian fratinon, kaj Olimpason, kaj ĉiujn sanktulojn
kun ili. 16 Salutu unu la alian per sankta kiso. Ĉiuj
eklezioj de Kristo vin salutas. 17 Nun mi vin petas,
fratoj, observi tiujn, kiuj kaŭzas la malkonsentojn
kaj ofendojn kontraŭ la instruado, kiun vi lernis; kaj
forturni vin de ili. 18 Ĉar tiaj homoj servas ne al nia
Sinjoro Kristo, sed al sia ventro; kaj per siaj belaj kaj
flataj vortoj ili trompas la korojn de la naivuloj. 19
Ĉar via obeemeco estas sciigita al ĉiuj homoj. Tial mi
ĝojas pro vi; sed mi deziras, ke vi estu saĝaj rilate la
bonon kaj malkleraj rilate la malbonon. 20 Kaj la Dio
de paco baldaŭ subpremos Satanon sub viaj piedoj.
La graco de nia Sinjoro Jesuo Kristo estu kun vi. 21
Salutas vin Timoteo, mia kunlaboranto, kaj Lucio kaj
Jason kaj Sosipatro, miaj parencoj. 22 Mi, Tertio, kiu
skribis ĉi tiun epistolon, salutas vin en la Sinjoro. 23
Vin salutas Gajo, la gastiganto de mi kaj de la tuta
eklezio. Vin salutas Erasto, la ekonomo de la urbo,
kaj Kvarto, la frato. 24 La graco de nia Sinjoro Jesuo
Kristo estu kun vi ĉiuj. Amen. 25 Al Tiu, kiu povas
fortikigi vin, laŭ mia evangelio kaj la predikado de
Jesuo Kristo, laŭ la malkaŝo de la mistero, silentigita
tra eternaj tempoj, **(aiōnios g166)** 26 sed nun elmontrita,
kaj per la profetaj skriboj laŭ la ordono de la eterna
Dio sciigita al ĉiuj nacioj por obeado de fido; **(aiōnios
g166)** 27 al la sola saĝa Dio, per Jesuo Kristo estu la
gloro por ĉiam kaj eterne. Amen. **(aiōn g165)**

# 1 Korintanoj

1 Paŭlo, vokita por esti apostolo de Jesuo Kristo
per la volo de Dio, kaj Sostenes, nia frato, 2 al tiu
eklezio de Dio, kiu estas en Korinto, al tiuj, kiuj estas
sanktigitaj en Kristo Jesuo, vokitaj por esti sanktuloj,
kune kun ĉiuj, kiuj en ĉiu loko vokas la nomon de
nia Sinjoro Jesuo Kristo, ilia Sinjoro kaj nia: 3 Graco
estu al vi kaj paco de Dio, nia Patro, kaj de la Sinjoro
Jesuo Kristo. 4 Mi ĉiam dankas mian Dion pri vi, pro
la graco de Dio al vi donita en Kristo Jesuo; 5 ke en
ĉio vi riĉiĝis en li, en ĉia parolo kaj ĉia scio; 6 kiel
ankaŭ la atesto de Kristo konfirmiĝis en vi; 7 tiel, ke
vi malatingas nenian donacon; atendante la malkaŝon
de nia Sinjoro Jesuo Kristo, 8 kiu ankaŭ konfirmos vin
ĝis la fino, por ke vi estu neriproĉeblaj en la tago de
nia Sinjoro Jesuo Kristo. 9 Fidela estas Dio, per kiu
vi estas alvokitaj en la kunulecon de Lia Filo Jesuo
Kristo, nia Sinjoro. 10 Mi petegas vin, fratoj, per la
nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo, ke vi ĉiuj parolu
tion saman, kaj ke estu neniaj skismoj inter vi; sed ke
vi estu perfekte kunigitaj en la sama spirito kaj en
la sama juĝo. 11 Ĉar pri vi, miaj fratoj, estas sciigite
al mi de la domanoj de Ĥloe, ke ekzistas inter vi
malpacoj. 12 Kaj la jenon mi volas diri, ke ĉiu el vi
diras: Mi estas de Paŭlo; kaj mi de Apolos; kaj mi de
Kefas; kaj mi de Kristo. 13 Ĉu Kristo estas dividita?
ĉu Paŭlo krucumiĝis por vi? aŭ ĉu vi baptiĝis en la
nomon de Paŭlo? 14 Mi dankas Dion, ke mi baptis
neniun el vi krom Krispo kaj Gajo; 15 por ke neniu
diru, ke vi baptiĝis en mian nomon. 16 Kaj mi baptis
ankaŭ la familion de Stefanas; krom tio mi ne scias,
ĉu mi baptis iun alian. 17 Ĉar Kristo sendis min, ne
por bapti, sed por prediki la evangelion; ne en saĝeco
de vortoj, por ke la kruco de Kristo ne vantiĝu. 18
Ĉar la priparolo de la kruco estas por la pereantoj
malsaĝeco; sed por ni, la savatoj, ĝi estas la potenco
de Dio. 19 Ĉar estas skribite: Mi pereigos la saĝecon de
la saĝuloj, Kaj la kompetentecon de la kompetentuloj
Mi malaperigos. 20 Kie estas la saĝulo? kie estas la
skribisto? kie estas la diskutisto de ĉi tiu tempaĝo? ĉu
Dio ne malsaĝigis la saĝecon de la mondo? (aiōn g165) 21
Ĉar pro tio, ke en la saĝeco de Dio la mondo per sia
saĝeco ne konis Dion, bonvolis Dio per la malsaĝeco
de la prediko savi la kredantojn. 22 Ĉar Judoj postulas
signojn, kaj Grekoj serĉas saĝecon; 23 sed ni predikas
Kriston krucumitan, por Judoj falilon, kaj por Grekoj
malsaĝon; 24 sed por la vokitoj mem, ĉu Judoj aŭ
Grekoj, Kriston la potencon de Dio, kaj la saĝecon de
Dio. 25 Ĉar la malsaĝeco de Dio estas pli saĝa ol homoj;
kaj la malforteco de Dio estas pli forta ol homoj. 26
Ĉar rigardu vian vokon, fratoj, ke ne multaj saĝuloj
laŭ la karno, ne multaj potenculoj, ne multaj nobeloj,
estas vokataj; 27 sed Dio elektis la malsaĝajn objektojn
de la mondo, por hontigi la saĝulojn; kaj Dio elektis
la malfortajn objektojn de la mondo, por hontigi la
fortajn; 28 kaj la malnoblajn objektojn de la mondo,
kaj la malestimatajn Dio elektis, kaj eĉ la nerealajn,
por neniigi la realajn; 29 por ke neniu karno fieru
antaŭ Dio. 30 Sed el Li vi estas en Kristo Jesuo, kiu
fariĝis al ni saĝeco el Dio, kaj justeco kaj sanktigo, kaj
elaĉeto; 31 por ke, kiel estas skribite: Kiu fieras, tiu
fieru en la Eternulo.

2 Kaj mi, fratoj, venante al vi, venis ne kun supereco
de parolo aŭ de saĝeco, proklamante al vi la
misteron de Dio. 2 Ĉar mi decidis scii ĉe vi nenion,
krom Jesuo Kristo kaj tiu krucumita. 3 Kaj mi estis ĉe
vi en malforteco kaj en timo kaj en multa tremado.
4 Kaj mia parolo kaj mia prediko estis ne en allogaj
paroloj de saĝeco, sed en elmontro de la Spirito kaj
potenco, 5 por ke via fido estu ne laŭ la saĝeco de
homoj, sed laŭ la potenco de Dio. 6 Tamen ni parolas
saĝecon inter plenaĝuloj, sed saĝecon ne de ĉi tiu
mondo, nek de la regantoj de ĉi tiu mondo, kiuj
neniiĝas; (aiōn g165) 7 sed ni parolas la saĝecon de Dio
en mistero, la saĝecon kaŝitan, kiun Dio antaŭdestinis
antaŭ la mondaĝoj por nia glorado; (aiōn g165) 8 kaj
kiun scias neniu el la regantoj de ĉi tiu mondo; ĉar
se ili ĝin scius, ili ne krucumus la Sinjoron de gloro;
(aiōn g165) 9 sed kiel estas skribite: Tion, kion okulo
ne vidis kaj orelo ne aŭdis, Kaj kio en la koron de
homo ne eniris, Dio preparis por tiuj, kiuj Lin amas.
10 Sed al ni Dio malkaŝis ilin per la Spirito; ĉar la
Spirito esploras ĉion, eĉ la profundaĵojn de Dio. 11 Ĉar
kiu inter homoj scias la aferojn de iu homo, krom la
spirito de la homo, kiu estas en li? tiel same la aferojn
de Dio scias neniu, krom la Spirito de Dio. 12 Sed ni
ricevis ne la spiriton de la mondo, sed la spiriton, kiu
estas de Dio; por ke ni sciu tion, al ni donacitan de
Dio. 13 Pri kio ankaŭ ni parolas per vortoj, ne kiujn
instruas homa saĝeco, sed kiujn instruas la Spirito;
komparante spiritajn kun spiritaj. 14 Sed la natura
homo ne akceptas la aferojn de la Spirito de Dio; ĉar

ili estas por li malsaĝeco; kaj li ne povas ilin scii, pro
tio, ke ili estas juĝataj spirite. 15 Sed la spirita homo
juĝas ĉion, kaj li mem estas juĝata de neniu. 16 Ĉar
kiu sciis la menson de la Eternulo, ke li instruu Lin?
Sed ni havas la menson de Kristo.

3 Kaj mi, fratoj, ne povis paroli al vi kiel al spirituloj,
sed kiel al karnuloj, kiel al infanetoj en Kristo. 2 Mi
nutris vin per lakto, ne per manĝaĵoj; ĉar vi ankoraŭ
tion ne kapablis; kaj eĉ nun vi ne kapablas; 3 ĉar
vi estas ankoraŭ karnaj; ĉar dum ekzistas inter vi
ĵaluzo kaj malpaco, ĉu vi ne estas karnaj kaj iradas
laŭ la maniero de homoj? 4 Ĉar kiam unu diras: Mi
estas de Paŭlo; kaj alia: Mi estas de Apolos; ĉu vi ne
estas homoj? 5 Kio do estas Apolos? kaj kio estas
Paŭlo? Servantoj, per kiuj vi ekkredis; kaj ĉiu, kiel
la Sinjoro al li donis. 6 Mi plantis, Apolos akvumis;
sed Dio kreskigis. 7 Tial nek la plantanto estas io,
nek la akvumanto; sed Dio, la kreskiganto. 8 Sed la
plantanto kaj la akvumanto estas unu; sed ĉiu ricevos
sian propran rekompencon laŭ sia laboro. 9 Ĉar ni
estas kunlaborantoj kun Dio: vi estas la kultivotaĵo de
Dio, la konstruotaĵo de Dio. 10 Laŭ la graco de Dio
al mi donita, kiel saĝa majstromasonisto mi metis
fundamenton; kaj aliaj surkonstruas. Sed ĉiu zorgu,
kiel li surkonstruas. 11 Ĉar neniu povas meti alian
fundamenton krom tiu, kiu estas metita, tio estas
Jesuo Kristo. 12 Sed se iu konstruas sur la fundamento
oron, arĝenton, multekostajn ŝtonojn, lignon, fojnon,
pajlon, 13 ĉies laboraĵo evidentiĝos; ĉar la tago ĝin
montros, pro tio, ke ĝi estas malkaŝita en fajro; kaj
la fajro mem provos ĉies laboraĵon, kia ĝi estas. 14
Se restos ies laboraĵo, kiun li surkonstruis, li ricevos
rekompencon. 15 Se ies laboraĵo forbrulos, li suferos
perdon; sed li mem saviĝos; tamen kiel tra fajro. 16 Ĉu
vi ne scias, ke vi estas templo de Dio kaj ke en vi loĝas
la Spirito de Dio? 17 Se iu detruas la templon de Dio,
tiun detruos Dio; ĉar la templo de Dio estas sankta, kaj
vi estas tio. 18 Neniu sin trompu. Se iu el vi opinias
sin saĝa en ĉi tiu mondo, li fariĝu malsaĝulo, por ke
li saĝiĝu. (aiōn g165) 19 Ĉar la saĝeco de ĉi tiu mondo
estas malsaĝeco ĉe Dio. Ĉar estas skribite: Li kaptas
la saĝulojn per ilia ruzaĵo; 20 kaj ankaŭ: La Eternulo
scias la pensojn de saĝuloj, ke ili estas vantaj. 21 Tial
neniu fanfaronu pri homoj. Ĉar ĉio apartenas al vi, 22
ĉu Paŭlo, aŭ Apolos, aŭ Kefas, aŭ la mondo, aŭ la vivo,
aŭ la morto, aŭ estantaĵoj aŭ estontaĵoj: ĉio apartenas
al vi, 23 kaj vi al Kristo, kaj Kristo al Dio.

4 Tiel oni rigardu nin, kiel servantojn de Kristo kaj
administrantojn de la misteroj de Dio. 2 Cetere, ĉi
tie estas postulate ĉe administrantoj, ke oni troviĝu
fidela. 3 Sed ĉe mi estas tre malgrava afero esti juĝata
de vi, aŭ per homa juĝo: mi ja ne juĝas min mem. 4 Ĉar
mi scias nenion kontraŭ mi; tamen mi ne estas pro tio
pravigita; sed tiu, kiu juĝas min, estas la Sinjoro. 5 Tial
juĝu nenion antaŭ la tempo, ĝis venos la Sinjoro, kiu
enlumigos la kaŝitaĵojn de la mallumo kaj klarigos la
intencojn de la koroj; kaj tiam ĉiu ricevos de Dio sian
propran laŭdon. 6 Tion do, fratoj, mi alifigure rilatigis
al mi kaj Apolos pro vi; por ke vi en ni lernu ne
preterpasi la skribitaĵojn; por ke neniu el vi bloveŝvelu
por unu kontraŭ la alia. 7 Ĉar kiu vin diferencigas?
kaj kion vi havas, kion vi ne ricevis? sed se vi ĝin
ricevis, kial vi fanfaronas, kvazaŭ vi ĝin ne ricevus? 8
Jam vi estas plenigitaj, jam vi riĉiĝis, vi reĝis sen ni;
kaj mi ja volus, ke vi efektive reĝu, por ke ni ankaŭ
reĝu kun vi. 9 Ĉar ŝajnas al mi, ke Dio elmetis nin, la
apostolojn, la plej lastajn, kiel mortkondamnitajn; ĉar
ni fariĝis spektaklo al la mondo kaj al anĝeloj kaj al
homoj. 10 Ni estas malsaĝuloj pro Kristo, sed vi estas
saĝaj en Kristo; ni estas malfortaj, sed vi estas fortaj;
vi estas gloraj, sed ni estas senhonoraj. 11 Eĉ ĝis la
nuna horo ni malsatas kaj soifas, kaj ni estas nudaj,
kaj ni estas batataj kaj senhejmaj; 12 kaj ni penadas,
laborante per niaj propraj manoj; insultate, ni benas;
persekutate, ni eltenas; 13 kalumniate, ni petegas;
ni fariĝas kiel la balaaĵo de la mondo, la forĵetaĵo
de ĉio, eĉ ĝis nun. 14 Ne por hontigi vin mi tion
skribas, sed, kiel miajn amatajn filojn, por admoni
vin. 15 Ĉar kvankam vi eĉ havus dek mil pedagogojn
en Kristo, tamen vi havas ne multajn patrojn; ĉar en
Kristo Jesuo mi naskigis vin per la evangelio. 16 Mi do
petegas vin, estu imitantoj de mi. 17 Pro tio mi sendis
al vi Timoteon, kiu estas mia amata kaj fidela filo en
la Sinjoro, kaj kiu vin memorigos pri miaj vojoj en
Kristo, ĝuste kiel mi instruas ĉie en ĉiu eklezio. 18
Kelkaj bloveŝvelas, kvazaŭ mi ne venus al vi. 19 Sed
mi venos al vi baldaŭ, se la Sinjoro tion volos; kaj
mi ekscios, ne la parolon de la bloveŝvelintoj, sed la
potencon. 20 Ĉar la regno de Dio estas ne en parolo,
sed en potenco. 21 Kion vi volas? ĉu kun vergo mi
venu al vi, aŭ en amo kaj en spirito de humileco?

5 Efektive oni raportas, ke estas ĉe vi malĉasteco, kaj
tia malĉasteco, kia ne ekzistas eĉ inter la nacianoj,
ke iu havas la edzinon de sia patro. 2 Kaj vi bloveŝvelis,
kaj ne prefere ploregis, por ke tiu, kiu faris tion,
foriĝu el inter vi. 3 Ĉar mi vere, korpe forestante,
sed spirite ĉeestante, jam juĝis, kvazaŭ ĉeestante,
tiun, kiu tiel faris tion, 4 en la nomo de nia Sinjoro
Jesuo Kristo, en kunveno de vi kaj de mia spirito
kun la potenco de nia Sinjoro Jesuo, 5 transdoni tian
homon al Satano por la detruo de la karno, por ke la
spirito saviĝu en la tago de la Sinjoro Jesuo. 6 Ne bona
estas via fanfaronado. Ĉu vi ne scias, ke malmulto da
fermentaĵo fermentigas la tutan mason? 7 Forpurigu
la malnovan fermentaĵon, por ke vi estu nova maso,
kiel vi estas nefermentintaj. Ĉar por ni ankaŭ Pasko
estas oferita, nome Kristo; 8 tial ni festu, ne per
malnova fermentaĵo, nek per fermentaĵo de malico kaj
malboneco, sed per la senfermenta pano de sincereco
kaj vereco. 9 En mia epistolo mi skribis al vi, ke vi
ne intermiksu vin kun malĉastuloj; 10 ne tute kun la
malĉastuloj de ĉi tiu mondo, aŭ kun la aviduloj kaj
rabemuloj, aŭ kun idolanoj; ĉar tiuokaze estus necese,
ke vi eliru el la mondo; 11 sed nun mi skribas al vi, ke
vi ne intermiksu vin, se iu, nomata frato, eble estas
malĉastulo, aŭ avidulo, aŭ idolano, aŭ insultanto, aŭ
drinkulo, aŭ rabemulo; kun tia homo eĉ ne kunmanĝu.
12 Ĉar kiel koncernas min juĝi la eksterulojn? Ĉu vi ne
juĝas la internulojn, 13 dum la eksterulojn juĝas Dio?
Forigu el inter vi la malvirtulon.

6 Ĉu iu el vi, havante aferon kontraŭ sia proksimulo,
kuraĝas procesi antaŭ la malpiuloj, kaj ne antaŭ la
sanktuloj? 2 Aŭ ĉu vi ne scias, ke la sanktuloj juĝos la
mondon? kaj se la mondon vi juĝos, ĉu vi ne estas
indaj juĝi la plej malgrandajn aferojn? 3 Ĉu vi ne scias,
ke ni juĝos anĝelojn? kiom pli do aferojn de la nuna
vivo? 4 Se do vi devas starigi tribunalon pri la aferoj
de la nuna vivo, ĉu vi faras juĝantoj tiujn, kiuj estas
negravaj en la eklezio? 5 Mi diras tion, por vin hontigi.
Ĉu efektive ne ekzistas ĉe vi eĉ unu saĝulo, kiu povus
decidi inter siaj fratoj, 6 sed frato procesas kontraŭ
frato, kaj eĉ antaŭ nekredantoj? 7 Certe jam estas ĉe
vi granda domaĝo, ke vi faras procesojn unu kontraŭ
alia. Kial vi ne prefere suferas maljustecon? kial vi ne
prefere suferas rabadon? 8 Tamen eĉ vi mem faras
maljustecon kaj rabadon, kaj eĉ kontraŭ la fratoj. 9 Aŭ
ĉu vi ne scias, ke la maljustuloj ne heredos la regnon de
Dio? Ne trompiĝu: nek malĉastuloj, nek idolanoj, nek
adultuloj, nek molmoruloj, nek viruzaĉantoj, 10 nek
ŝtelistoj, nek aviduloj, nek drinkuloj, nek insultantoj,
nek rabemuloj, heredos la regnon de Dio. 11 Kaj tiaj
estis kelkaj el vi; sed vi laviĝis, sed vi sanktiĝis, sed vi
justiĝis en la nomo de la Sinjoro Jesuo Kristo kaj en la
Spirito de nia Dio. 12 Ĉio estas por mi permesata, sed
ne ĉio estas oportuna. Ĉio estas por mi permesata;
sed mi ne volas sub io submetiĝi. 13 Manĝaĵoj por la
ventro, kaj la ventro por manĝaĵoj; sed Dio neniigos
kune ĝin kaj ilin. Sed la korpo estas ne por malĉasteco,
sed por la Sinjoro; kaj la Sinjoro por la korpo; 14
kaj Dio levis la Sinjoron, kaj levos ankaŭ nin per
Sia potenco. 15 Ĉu vi ne scias, ke viaj korpoj estas
membroj de Kristo? ĉu mi do prenos la membrojn
de Kristo, kaj faros ilin membroj de malĉastistino?
Nepre ne! 16 Aŭ ĉu vi ne scias, ke tiu, kiu kuniĝas kun
malĉastistino, estas kun ŝi unu korpo? ĉar: Ili, Li diris,
estos unu karno. 17 Sed tiu, kiu kuniĝas kun la Sinjoro,
estas kun li unu spirito. 18 Forkuru de malĉasteco. Ĉiu
peko, kiun homo faras, estas ekster la korpo; sed tiu,
kiu malĉastas, pekas kontraŭ sia propra korpo. 19 Aŭ
ĉu vi ne scias, ke via korpo estas templo de la Sankta
Spirito, kiu estas en vi kaj kiun vi havas de Dio? kaj vi
ne apartenas al vi mem, 20 ĉar vi estas aĉetitaj per
prezo; gloru do Dion en via korpo.

7 Nun rilate al la aferoj, pri kiuj vi skribis: Estas bone
por viro, ne tuŝi virinon. 2 Sed pro malĉastaĵoj
ĉiu viro havu propran edzinon, kaj ĉiu virino havu
propran edzon. 3 La edzo donu al la edzino ŝian
rajtaĵon; tiel same ankaŭ la edzino al la edzo. 4 Ne
la edzino, sed la edzo rajtas pri ŝia korpo; tiel same
ankaŭ ne la edzo, sed la edzino rajtas pri lia korpo.
5 Ne senigu unu la alian, krom eble kun konsento
por kelka tempo, por ke vi dediĉu vin al preĝado, kaj
kuniĝu denove, por ke Satano vin ne tentu pro manko
de sinregado. 6 Sed tion mi diras kiel permeson, ne
kiel ordonon. 7 Sed mi volus, ke ĉiuj homoj estu kiel
mi mem. Tamen ĉiu havas sian propran donacon de
Dio, unu tiel, alia alie. 8 Sed mi diras al senedzinuloj
kaj al vidvinoj: Estas bone por ili resti kiel mi. 9 Sed
se ili ne povas sin deteni, ili edziĝu; ĉar estas pli
bone edziĝi, ol bruladi. 10 Sed al geedzoj mi ordonas
(tamen ne mi, sed la Sinjoro): Ke edzino ne foriĝu de
sia edzo 11 (tamen, se ŝi foriĝas, ŝi restu senedza, aŭ
denove konsentiĝu kun sia edzo); kaj ke la edzo ne

forsendu sian edzinon. 12 Sed al la ceteraj diras mi, ne
la Sinjoro: Se iu frato havas nekredantan edzinon,
kaj ŝi konsentas loĝadi kun li, li ne forigu ŝin. 13 Kaj
se virino havas nekredantan edzon, kaj li konsentas
loĝadi kun ŝi, ŝi ne forlasu sian edzon. 14 Ĉar la
nekredanta edzo estas sanktigita per la edzino, kaj
la nekredanta edzino estas sanktigita per la frato;
alie viaj infanoj estus profanaj, sed nun ili estas
sanktaj. 15 Tamen se la nekredanto volas foriri, li
foriru: la frato aŭ la fratino en tiaj okazoj ne estas
sklavigita; sed Dio vokis nin en paco. 16 Ĉar kiel vi
scias, ho edzino, ĉu vi savos vian edzon? aŭ kiel vi
scias, ho edzo, ĉu vi savos vian edzinon? 17 Sed kiel
la Sinjoro disdonis al ĉiu, kiel Dio ĉiun vokis, tiel li
iru. Kaj tiel mi ordonas en ĉiuj eklezioj. 18 Ĉu iu estas
vokita, cirkumcidite? li ne fariĝu necirkumcidita. Ĉu
iu estas vokita, necirkumcidite? li ne cirkumcidiĝu.
19 Cirkumcido estas nenio, kaj necirkumcido estas
nenio; sed la plenumado de la ordonoj de Dio. 20
Ĉiu restadu en tiu voksorto, en kiu li estas vokita.
21 Ĉu vi estas vokita, estante sklavo? ne ĉagreniĝu
pro tio; sed se vi povas liberiĝi, tion uzu prefere. 22
Ĉar kiu estas vokita en la Sinjoro, estante sklavo, tiu
estas liberulo de la Sinjoro; tiel same tiu, kiu estas
vokita, estante libera, estas sklavo de Kristo. 23 Vi
estas aĉetitaj per prezo; ne fariĝu sklavoj de homoj.
24 Fratoj, ĉiu, kie li estas vokita, tie restadu kun Dio.
25 Sed rilate al virgulinoj, mi ne havas ordonon de la
Sinjoro; sed mi donas mian opinion, kiel ricevinta de
la Sinjoro indulgon, por esti fidela. 26 Mi opinias do,
ke la jeno estas bona pro la nuna neceseco, nome, ke
estas bone por viro samstate resti. 27 Ĉu vi estas ligita
kun edzino? ne serĉu malligon. Ĉu vi estas malligita
je edzino? ne serĉu edzinon. 28 Sed se vi edziĝas, vi
ne pekas; kaj se virgulino edziniĝas, ŝi ne pekas. Sed
tiaj personoj havos maltrankvilon en la karno; kaj
mi volas indulgi vin. 29 Sed la jenon mi diras, fratoj:
La tempo estas mallongigita, por ke de nun tiuj, kiuj
havas edzinojn, estu kvazaŭ ili ne havus; 30 kaj la
plorantoj, kvazaŭ ne plorantaj; kaj la ĝojantoj, kvazaŭ
ne ĝojantaj; kaj la aĉetantoj, kvazaŭ ne posedantaj; 31
kaj tiuj, kiuj uzas la mondon, kvazaŭ ne trouzantaj
ĝin; ĉar la formo de ĉi tiu mondo forpasas. 32 Sed mi
volas, ke vi estu sen zorgoj. La needziĝinto prizorgas
la aferojn de la Sinjoro, kiamaniere li povos plaĉi al la
Sinjoro; 33 sed la edziĝinto prizorgas la aferojn de la
mondo, kiamaniere li povos plaĉi al sia edzino. 34 Kaj
estas diferenco ankaŭ inter edzino kaj virgulino. La
needziniĝinto prizorgas la aferojn de la Sinjoro, por
ke ŝi estu sankta korpe kaj spirite; sed la edziniĝinto
prizorgas la aferojn de la mondo, kiamaniere ŝi povos
plaĉi al sia edzo. 35 Kaj tion mi diras por via propra
utilo; ne por ĵeti kaptilon sur vin, sed pro konveneco,
kaj por ke vi atentu la Sinjoron nedistrite. 36 Sed se iu
opinias, ke li kondutas nedece kontraŭ sia virgulino,
se ŝi preteriras sian aĝfloradon, kaj se tio estas necesa,
li faru tion, kion li volas; li ne pekas; ili geedziĝu. 37
Sed tiu, kiu staras firma en sia koro, havante nenian
neceson, sed regas sian propran volon, kaj decidis
en sia koro gardi sian virgulinon, faras bone. 38 Tiel
tiu, kiu lasas sian virgulinon edziniĝi, faras bone; kaj
tiu, kiu ne lasas ŝin edziniĝi, faros pli bone. 39 Edzino
estas ligita tiel longe, kiel vivas ŝia edzo; sed se la
edzo mortis, ŝi estas libera edziniĝi kun iu, kun kiu ŝi
volas; nur en la Sinjoro. 40 Sed laŭ mia opinio ŝi estas
pli feliĉa, se ŝi restas samstate; kaj mi opinias, ke mi
ankaŭ havas la Spiriton de Dio.

8 Nun rilate al oferitaĵoj al idoloj: Ni scias, ke ni
ĉiuj havas scion. La scio bloveŝveligas, sed la amo
edifas. 2 Se iu opinias, ke li scias ion, tiu ankoraŭ ne
tiel scias, kiel li devus scii; 3 sed se iu amas Dion,
tiu estas konata de Li. 4 Rilate do la manĝadon de
la idoloferitaĵoj, ni scias, ke idolo estas neniaĵo en
la mondo, kaj ke ne ekzistas Dio krom unu. 5 Ĉar
kvankam estas tiel nomataj dioj, ĉu en la ĉielo aŭ
sur la tero, kiel estas dioj multenombraj, kaj sinjoroj
multenombraj, 6 tamen por ni estas unu Dio, la Patro,
el kiu estas ĉio, kaj ni por Li; kaj unu Sinjoro, Jesuo
Kristo, per kiu estas ĉio, kaj ni per li. 7 Tamen ne ĉe
ĉiuj estas tiu scio; sed iuj, pro sia ĝisnuna kutimiĝo al
la idolo, manĝas la manĝaĵon kiel oferitaĵon al idolo;
kaj ilia konscienco, estante malforta, malpuriĝas. 8
Sed manĝaĵo ne rekomendos nin al Dio; ĉar ni havas
nek mankon, se ni ne manĝas, nek profiton, se ni
manĝas. 9 Sed gardu vin, por ke ĉi tiu via libereco ne
fariĝu faligilo por la malfortuloj. 10 Ĉar se iu vidas
vin, kiu havas scion, sidantan ĉe manĝo en idolejo,
ĉu lia konscienco, se li estas malforta, ne kuraĝiĝos
manĝi idoloferitaĵojn? 11 Pro via scio do pereas la
malfortulo, la frato, pro kiu Kristo mortis. 12 Kaj
tiamaniere, pekante kontraŭ la frataro, kaj vundante
ilian konsciencon malfortan, vi pekas kontraŭ Kristo.
13 Tial se manĝaĵo maledifas mian fraton, mi neniam

plu manĝos karnon, por ke mi ne maledifu mian
fraton. **(aiōn g165)**

**9** Ĉu mi ne estas libera? ĉu mi ne estas apostolo?
ĉu mi ne vidis nian Sinjoron Jesuo? ĉu vi ne
estas mia laboraĵo en la Sinjoro? 2 Se ĉe aliaj mi ne
estas apostolo, tamen almenaŭ mi estas ĉe vi; ĉar la
sigelo de mia apostoleco vi estas en la Sinjoro. 3 Mia
respondo al tiuj, kiuj min ekzamenas, estas jena: 4
Ĉu ni ne rajtas manĝi kaj trinki? 5 Ĉu ni ne rajtas
ĉirkaŭkonduki edzinon, kiu estas kredantino, kiel
ankaŭ la ceteraj apostoloj kaj la fratoj de la Sinjoro
kaj Kefas? 6 Aŭ mi sola kaj Barnabas, ĉu ni ne rajtas
ĉesi labori? 7 Kiu soldato iam deĵoras je sia propra
elspezo? kiu plantas vinberĝardenon, kaj ne manĝas
ĝian frukton? aŭ kiu paŝtas ŝafaron, kaj ne manĝas
el la lakto de la ŝafaro? 8 Ĉu mi parolas tion kiel
homo? ĉu ne diras la leĝo tion saman? 9 Ĉar estas
skribite en la leĝo de Moseo: Ne fermu la buŝon al
bovo draŝanta. Ĉu pri la bovoj Dio zorgas? 10 aŭ ĉu Li
diras tion tute pro ni? Jes, pro ni ĝi estas skribita;
ĉar pluganto devas plugi kun espero, kaj draŝanto
devas draŝi kun espero al partopreno. 11 Se ni semis
al vi spiritajn aferojn, ĉu estas io grava, se ni rikoltos
viajn karnajn aferojn? 12 Se aliaj partoprenas ĉi tiun
rajton super vi, ĉu ne ni ankoraŭ pli multe? Tamen
ni ne uzis ĉi tiun rajton; sed ni eltenas ĉion, por ke
ni neniel malhelpu la evangelion de Kristo. 13 Ĉu vi
ne scias, ke tiuj, kiuj sin okupas pri sanktaj aferoj,
manĝas el la templaj manĝaĵoj, kaj tiuj, kiuj deĵoras
ĉe la altaro, partoprenas kune kun la altaro? 14 Tial
same la Sinjoro ordonis, ke la proklamantoj de la
evangelio vivadu per la evangelio. 15 Sed mi uzis
nenion el tiuj rajtoj; kaj mi skribas ĉi tion, ne por ke
tio estu farita ĉe mi; ĉar estus pli bone por mi morti,
ol se iu vantigus mian fieraĵon. 16 Ĉar se mi predikas
la evangelion, mi havas nenion, pri kio fieri; ĉar
neceseco kuŝas sur mi; ĉar ve al mi, se mi ne predikus
la evangelion! 17 Ĉar se mi tion faras propravole,
mi havas rekompencon; sed se ne propravole, kiel
administranto mi estas komisiita. 18 Kio do estas mia
rekompenco? Ke kiam mi predikas la evangelion, mi
faru la evangelion senpaga, por ke mi ne plene uzu
mian rajton en la evangelio. 19 Ĉar estante libera de
ĉiuj, mi min sklavigis sub ĉiujn, por ke mi gajnu des
pli multajn. 20 Kaj al la Judoj mi fariĝis kiel Judo, por
ke mi gajnu Judojn; al tiuj, kiuj estas sub la leĝo, kiel
sub la leĝo, ne estante mem sub la leĝo, por ke mi
gajnu tiujn, kiuj estas sub la leĝo; 21 al tiuj, kiuj estas
sen leĝo, kiel sen leĝo, ne estante sen leĝo rilate Dion,
sed sub leĝo rilate Kriston, por ke mi gajnu tiujn, kiuj
estas sen leĝo. 22 Al la malfortuloj mi fariĝis malforta,
por ke mi gajnu la malfortulojn; mi fariĝis ĉio al ĉiuj,
por ke mi nepre savu kelkajn. 23 Kaj mi faras ĉion pro
la evangelio, por ke mi ĝin partoprenu. 24 Ĉu vi ne
scias, ke ĉiuj kurantoj en la areno kuras, sed nur unu
ricevas la premion? Tiel same kuru, por ke vi atingu.
25 Kaj ĉiu konkuranto sin regas en ĉio. Ili faras tion,
por ricevi pereontan kronon; sed ni, nepereontan. 26
Mi do tiel kuras, kiel ne sendecide; tiel mi boksas,
kiel ne batante la aeron; 27 sed mi kontuzas mian
korpon, kaj ĝin subpremas; por ke mi, predikinte al
aliaj, nepre ne estu mem forrifuzata.

**10** Ĉar mi ne volas, fratoj, ke vi ne sciu, ke niaj
prapatroj estis ĉiuj sub la nubo, kaj ĉiuj trairis la
maron; 2 kaj ĉiuj baptiĝis en Moseon en la nubo kaj en
la maro; 3 kaj ĉiuj manĝis la saman spiritan manĝaĵon;
4 kaj ĉiuj trinkis la saman spiritan trinkaĵon; ĉar ili
trinkis el spirita roko, kiu ilin sekvis; kaj la roko estis
Kristo. 5 Tamen la plejmulto el ili ne plaĉis al Dio;
ili ja disĵetiĝis en la dezerto. 6 Sed tio okazis kiel
ekzemploj por ni, por ke ni ne deziregu malbonaĵojn,
kiel ili ankaŭ deziregis. 7 Kaj vi ne estu idolanoj, kiel
estis kelkaj el ili; kiel estas skribite: La popolo sidiĝis,
por manĝi kaj trinki, kaj ili leviĝis, por ludi. 8 Kaj ni
ne malĉastadu, kiel kelkaj el ili faris, kaj falis en unu
tago dudek tri mil. 9 Kaj ni ne incitu la Eternulon,
kiel kelkaj el ili incitis, kaj pereis per serpentoj. 10
Kaj vi ne murmuru, kiel kelkaj el ili murmuris, kaj
pereis per la ekstermanto. 11 Tio okazis al ili kiel
ekzemploj, kaj ĝi estas skribita kiel admono por ni,
sur kiujn venis la finoj de la mondaĝoj. **(aiōn g165)** 12
Tiu do, kiu opinias, ke li staras, sin gardu, por ke li
ne falu. 13 Nenia tento vin prenis, krom laŭ homa
forto; sed fidela estas Dio, kiu ne lasos vin esti tentataj
super via forto; sed kune kun la tento ankaŭ faros la
forkurejon, por ke vi povu ĝin elporti. 14 Tial, miaj
amataj, forsavu vin de idolservado. 15 Mi parolas
kiel al saĝuloj; vi juĝu tion, kion mi diras. 16 Ĉu ne
estas la kaliko de beno, kiun ni benas, partopreno
en la sango de Kristo? Ĉu ne estas la pano, kiun ni
dispecigas, partopreno en la korpo de Kristo? 17 pro
tio, ke ni, kiuj estas multaj, estas unu pano, unu korpo;

ĉar ni ĉiuj prenas parton el la unu pano. 18 Rigardu
Izraelon laŭ la karno: ĉu ne estas tiuj, kiuj manĝas la
oferojn, partoprenantoj en la altaro? 19 Kion do mi
diras? ke idoloferitaĵo estas io, aŭ ke idolo estas io?
20 Sed mi diras, ke tion, kion oferas la nacianoj, ili
oferas al demonoj, kaj ne al Dio; kaj mi ne volas, ke
vi partoprenu kun demonoj. 21 Vi ne povas trinki la
kalikon de la Sinjoro kaj la kalikon de demonoj; vi ne
povas partopreni ĉe la tablo de la Sinjoro kaj ĉe la
tablo de demonoj. 22 Aŭ ĉu ni ĵaluzigas la Sinjoron?
ĉu ni estas pli fortaj ol li? 23 Ĉio estas permesata; sed
ne ĉio estas oportuna. Ĉio estas permesata; sed ne ĉio
edifas. 24 Neniu celu sian bonon, sed ĉiu la bonon
de sia proksimulo. 25 Kion oni vendas en la buĉejo,
ĉion manĝu, demandante nenion pro konscienco;
26 ĉar al la Eternulo apartenas la tero, kaj ĉio, kio
ĝin plenigas. 27 Se iu el la nekredantoj invitas vin al
festeno, kaj vi volas iri, kion oni metas antaŭ vi, ĉion
manĝu, demandante nenion pro konscienco. 28 Sed
se iu diras al vi: Ĉi tio estas oferitaĵo — ne manĝu,
pro la montrinto, kaj pro konscienco: 29 konscienco,
mi diras, ne via propra, sed de la alia; ĉar kial mia
libereco estus juĝata per alia konscienco? 30 Se mi
danke partoprenas, kial mi estus mallaŭdata pri tio,
pro kio mi donas dankon? 31 Ĉu do vi manĝas, aŭ
trinkas, aŭ kion ajn vi faras, faru ĉion por la gloro de
Dio. 32 Ne metu faligilon, ĉu por Judoj, aŭ por Grekoj,
aŭ por la eklezio de Dio; 33 tiel same, kiel mi ankaŭ
plaĉas al ĉiuj en ĉio, celante ne mian propran utilon,
sed la utilon de la multaj, por ke ili saviĝu.

11 Vi estu imitantoj de mi, kiel mi ankaŭ estas
imitanto de Kristo. 2 Mi laŭdas vin, ke vi min
memoras en ĉio, kaj ke vi firme tenas la tradiciojn,
ĝuste kiel mi transdonis ilin al vi. 3 Sed mi volas sciigi
vin, ke la kapo de ĉiu viro estas Kristo; kaj la kapo de
virino estas viro; kaj la kapo de Kristo estas Dio. 4
Ĉiu viro, preĝanta aŭ profetanta kun kapo kovrita,
malhonoras sian kapon. 5 Sed ĉiu virino, preĝanta
aŭ profetanta kun kapo senvuala, malhonoras sian
kapon; ĉar tio estas tia sama, kvazaŭ ŝi estus razita. 6
Ĉar se virino ne estas vualita, ŝi ankaŭ tondiĝu; sed
se estas hontinde por virino esti kun haroj tonditaj
aŭ razitaj, ŝi estu vualita. 7 Ĉar viro devas ne havi la
kapon vualita, pro tio, ke li estas la bildo kaj gloro
de Dio; sed virino estas la gloro de viro. 8 Ĉar viro
ne estas el virino, sed virino el viro; 9 ĉar ankaŭ
viro ne estas kreita por virino, sed virino por viro;
10 pro tio virino devas havi sur la kapo signon de
aŭtoritato, pro la anĝeloj. 11 Tamen ne ekzistas virino
sen viro, nek viro sen virino, en la Sinjoro. 12 Ĉar
kiel virino estas el viro, tiel same ankaŭ estas viro
per virino; sed ĉio estas el Dio. 13 Juĝu en vi mem:
ĉu decas, ke virino preĝu al Dio nevualite? 14 Ĉu
eĉ la naturo mem ne instruas vin, ke se viro havas
longajn harojn, tio estas por li malhonoro? 15 Sed se
virino havas longajn harojn, tio estas por ŝi gloro; ĉar
ŝiaj haroj estas donitaj al ŝi kiel kovraĵo. 16 Sed se
iu ŝajnas esti disputema, ni ne havas tian kutimon,
nek la eklezioj de Dio. 17 Sed ordonante al vi jene, mi
ne laŭdas vin, ke vi kunvenas ne por pliboniĝo, sed
por malpliboniĝo. 18 Ĉar unue mi aŭdas, ke kiam vi
kunvenas en la eklezio, ekzistas inter vi skismoj; kaj
mi parte kredas tion. 19 Ĉar necese estas, ke ankaŭ
herezoj estu inter vi, por ke la aprobitoj evidentiĝu
inter vi. 20 Kiam do vi kunvenas, estas neeble manĝi
la Sinjoran vespermanĝon; 21 ĉar en via manĝado
ĉiu antaŭ alia prenas sian propran vespermanĝon;
kaj unu malsatas, kaj alia drinkas. 22 Kio? ĉu vi ne
havas domojn, en kiuj vi povas manĝi kaj trinki? aŭ
ĉu vi malestimas la eklezion de Dio, kaj hontigas la
nehavantojn? Kion mi diros? ĉu mi vin laŭdos en tio?
Mi ja vin ne laŭdas. 23 Ĉar mi ricevis de la Sinjoro
tion, kion mi ankaŭ transdonis al vi, ke la Sinjoro
Jesuo en la nokto, en kiu li estis perfidata, prenis
panon; 24 kaj doninte dankon, li dispecigis ĝin, kaj
diris: Ĉio tio estas mia korpo, kiu estas por vi; ĉi tion
faru por memorigo pri mi. 25 Tiel same ankaŭ la
kalikon post la vespermanĝo, dirante: Ĉi tiu kaliko
estas la nova interligo en mia sango; ĉi tion faru
ĉiufoje, kiam vi trinkos, por memorigo pri mi. 26 Ĉar
ĉiufoje, kiam vi manĝos ĉi tiun panon kaj trinkos la
kalikon, vi proklamos la morton de la Sinjoro, ĝis li
venos. 27 Tial ĉiu, kiu neinde manĝos la panon aŭ
trinkos la kalikon de la Sinjoro, kulpiĝos pri la korpo
kaj la sango de la Sinjoro. 28 Sed oni sin provu, kaj
tiele manĝu el la pano kaj trinku el la kaliko. 29 Ĉar la
manĝanto kaj trinkanto manĝas kaj trinkas juĝon al si
mem, se li ne pripensas la korpon. 30 Pro tio multaj
inter vi estas malfortaj kaj malsanaj, kaj ne malmultaj
dormas. 31 Sed se ni pripensus nin mem, ni ne estus
juĝitaj. 32 Sed kiam ni estas juĝataj, ni estas punataj
de la Sinjoro, por ke ni ne estu kondamnitaj kune
kun la mondo. 33 Tial, miaj fratoj, kiam vi kunvenas

por manĝi, atendu unu la alian. 34 Se iu malsatas, li
manĝu hejme, por ke via kunvenado ne enkonduku
juĝon. Kaj la ceteron mi ordigos, kiam mi venos.

12 Rilate spiritajn donacojn, fratoj, mi ne volas, ke
vi estu nesciantaj. 2 Vi scias, ke kiam vi estis
nacianoj, vi estis forkondukataj al tiuj mutaj idoloj,
kiel ajn oni vin kondukis. 3 Tial mi sciigas vin, ke
neniu parolanta en la Spirito de Dio diras: Jesuo estas
anatemita; kaj neniu povas diri: Jesuo estas Sinjoro,
krom per la Sankta Spirito. 4 Ekzistas diverseco de
donacoj, sed la sama Spirito. 5 Kaj ekzistas diverseco
de servoj, kaj la sama Sinjoro. 6 Kaj ekzistas diverseco
de energioj, sed la sama Dio, kiu energias ĉion en
ĉiuj. 7 Sed al ĉiu estas donita la elmontro de la Spirito
por utilo. 8 Ĉar al unu estas donita per la Spirito la
vorto de saĝeco; kaj al alia, la vorto de scio, laŭ la
sama Spirito; 9 al alia, fido, en la sama Spirito; al alia,
donacoj de resanigoj, en la unu Spirito; 10 kaj al alia,
energioj por mirakloj; kaj al alia, profetpovo; kaj al
alia, distingoj de spiritoj; al alia, diversaj lingvoj; kaj
al alia, interpreto de lingvoj; 11 sed ĉion tion energias
la unu sama Spirito, dividante al ĉiu aparte, kiel al
li plaĉas. 12 Ĉar kiel la korpo estas unu, kaj havas
multajn membrojn, kaj ĉiuj membroj de la korpo,
estante multaj, estas unu korpo; tiel same ankaŭ estas
Kristo. 13 Ĉar en unu Spirito ni ĉiuj baptiĝis en unu
korpon, ĉu Judoj aŭ Grekoj, ĉu sklavoj aŭ liberaj; kaj
ĉiuj estas trinkigitaj el unu Spirito. 14 Ĉar la korpo
estas ne unu membro, sed multaj. 15 Se la piedo diros:
Pro tio, ke mi ne estas la mano, mi ne apartenas al
la korpo — ne sekvas de tio, ke ĝi ne apartenas al la
korpo. 16 Kaj se la orelo diros: Pro tio, ke mi ne estas
la okulo, mi ne apartenas al la korpo — ne sekvas
de tio, ke ĝi ne apartenas al la korpo. 17 Se la tuta
korpo estus okulo, kie estus la aŭdado? Se la tuta
estus aŭdado, kie estus la flarado? 18 Sed Dio jam
metis la membrojn al la korpo, ĉiun, kiel al Li plaĉis.
19 Kaj se ĉiuj estus unu membro, kie estus la korpo?
20 Nun do ekzistas multaj membroj, sed unu korpo.
21 Kaj la okulo ne povas diri al la mano: Mi vin ne
bezonas; nek same la kapo al la piedoj: Mi vin ne
bezonas. 22 Sed multe plie la ŝajne malfortaj membroj
de la korpo estas necesaj; 23 kaj al tiuj partoj de la
korpo, kiujn ni opinias malpli honorindaj, ni donas pli
abundan honoron; kaj niaj negraciaj partoj havas pli
abundan gracion; 24 sed niaj graciaj partoj ne havas
bezonon; tamen Dio kunakordigis la korpon, doninte
pli abundan honoron al la parto, kiu havas mankon, 25
por ke ne estu skismo en la korpo; sed ke la membroj
prizorgu egale unu la alian. 26 Kaj se unu membro
suferas, ĉiuj membroj kune suferas; aŭ se unu membro
honoriĝas, ĉiuj membroj kunĝojas. 27 Vi do estas la
korpo de Kristo, kaj membroj en ĝi, ĉiu laŭ sia parto. 28
Kaj Dio metis iujn en la eklezio, unue apostolojn, due
profetojn, trie instruantojn, poste miraklojn, poste
donacojn de kuracado, helpojn, direktojn, diversajn
lingvojn. 29 Ĉu ĉiuj estas apostoloj? ĉu ĉiuj profetoj?
ĉu ĉiuj instruantoj? ĉu ĉiuj mirakluloj? 30 ĉu ĉiuj
havas kuracan povon? ĉu ĉiuj parolas per lingvoj? ĉu
ĉiuj interpretas? 31 Sed vi deziru forte la pligrandajn
donacojn. Kaj ankoraŭ pli preferindan vojon mi
montras al vi.

13 Se mi parolus la lingvojn de homoj kaj anĝeloj,
sed ne havus amon, mi fariĝus sonanta kupro aŭ
tintanta cimbalo. 2 Kaj se mi posedus la profetpovon,
kaj komprenus ĉiujn misterojn kaj ĉian scion; kaj
se mi havus ĉian fidon, tiel ke mi povus formovi
montojn, sed ne havus amon, mi estus nenio. 3
Kaj se mi disdonus mian tutan havon por nutri la
malsatulojn, kaj se mi lasus mian korpon por forbrulo,
sed ne havus amon, per tio mi neniom profitus. 4
Amo longe suferas, kaj bonfaras; amo ne envias; amo
ne fanfaronas, ne ŝveligas sin, 5 ne kondutas nedece,
ne celas por si mem, ne koleriĝas, ne pripensas
malbonon, 6 ne ĝojas pri maljusteco, sed kunĝojas
kun vereco; 7 ĉion toleras, ĉion kredas, ĉion esperas,
ĉion eltenas. 8 Amo neniam pereas; sed, ĉu estas
profetadoj, ili neniiĝos; ĉu lingvoj, ili ĉesiĝos; ĉu
estas scio, ĝi neniiĝos. 9 Ĉar ni scias laŭparte, kaj ni
profetadas laŭparte; 10 sed kiam venos perfektaĵo,
tiam neniiĝos tio, kio estas laŭparta. 11 Kiam mi estis
infano, kiel infano mi parolis, kiel infano mi sentis,
kiel infano mi pensis; nun fariĝinte plenaĝulo, mi jam
forigis la infanaĵojn. 12 Ĉar nun ni vidas per spegulo,
malhele; sed tiam okulon ĉe okulo; nun mi konas
laŭparte; sed tiam mi konos tiel same, kiel ankaŭ mi
estas konita. 13 Restas do nun fido, espero, amo, tiuj
tri; kaj la plej granda el ili estas amo.

14 Sekvu amon; tamen deziregu spiritajn donacojn,
sed prefere, ke vi profetadu. 2 Ĉar tiu, kiu
per lingvo parolas, ne al homoj parolas, sed al Dio;
ĉar neniu komprenas, sed en la spirito li parolas

misterojn. 3 Sed la profetanto parolas al homoj edifon
kaj konsilon kaj konsolon. 4 Tiu, kiu per lingvo parolas,
edifas sin mem; sed la profetanto edifas la eklezion. 5
Mi volas, ke vi ĉiuj parolu per lingvoj, sed prefere, ke
vi profetadu; kaj pli granda estas la profetanto, ol la
per lingvoj parolanta, krom se li ankaŭ interpretas,
por ke la eklezio ricevu edifon. 6 Sed nun, fratoj, se mi
venus al vi, parolante per lingvoj, kiel mi vin helpus,
se mi ne parolus al vi, aŭ en formo de malkaŝado, aŭ
de sciado, aŭ de profetado, aŭ de instruado? 7 Eĉ la
senvivaĵoj, kiuj produktas sonon, ĉu fluto, ĉu harpo,
se ili ne donas diferencon en la sonoj, kiel oni scios,
kio estas flutata aŭ harpata? 8 Ĉar se la trumpeto
donos necertan voĉon, kiu pretiĝos por batalo? 9 Tiel
ankaŭ vi, se vi per la lango ne donas parolon facile
kompreneblan, kiel oni scios, kio estas parolata? ĉar
en la aeron vi parolus. 10 Eble estas tiom da specoj de
voĉoj en la mondo, kaj nenia estas sensignifa. 11 Se do
mi ne scios la signifon de la voĉo, mi estos, rilate la
parolanton, barbaro, kaj la parolanto estos por mi
barbaro. 12 Tiel same ankaŭ vi, dum vi fervore deziras
spiritajn donacojn, klopodu, ke vi havu abunde por la
edifo de la eklezio. 13 Tial kiu parolas per lingvo, tiu
preĝu, ke li interpretu. 14 Ĉar se mi preĝas per lingvo,
mia spirito preĝas, sed mia intelekto estas senfrukta.
15 Kio do estas? Mi preĝos spirite, kaj mi preĝos ankaŭ
intelekte; mi kantos spirite, kaj mi kantos ankaŭ
intelekte. 16 Alie, se vi benas spirite, kiamaniere tiu,
kiu okupas la lokon de la malklerulo, diros Amen ĉe
via dankesprimo? ĉar li ne scias, kion vi diras. 17 Ĉar
vi ja bone dankesprimas, sed la alia ne estas edifata.
18 Mi dankas Dion, mi parolas per lingvoj pli ol vi ĉiuj;
19 tamen en la eklezio mi preferus paroli kvin vortojn
per mia intelekto, por ke mi instruu ankaŭ aliajn, ol
dek mil vortojn per lingvo. 20 Fratoj, ne estu infanoj
en viaj mensoj; tamen en malico estu infanetoj, sed en
la mensoj estu plenaĝuloj. 21 En la leĝo estas skribite:
Per balbutantaj lipoj kaj per lingvo fremda Mi parolos
al ĉi tiu popolo; kaj tamen tiel ili ne volos aŭskulti
Min, diras la Eternulo. 22 Tial la lingvoj estas kiel
signo, ne al la kredantoj, sed al la nekredantoj; sed la
profetpovo estas kiel signo, ne al la nekredantoj, sed
al la kredantoj. 23 Se do la tuta eklezio kunvenos, kaj
ĉiuj parolos per lingvoj, kaj tien envenos nekleruloj
aŭ nekredantoj, ĉu ili ne diros, ke vi frenezas? 24 Sed
se ĉiuj profetos, kaj envenos nekredanto aŭ neklerulo,
li estos konvinkata de ĉiuj, li estos juĝata de ĉiuj; 25 la
sekretoj de lia koro estos elmontrataj; kaj sekve li falos
sur sian vizaĝon kaj adoros Dion, deklarante, ke Dio ja
estas ĉe vi. 26 Kio do estas, fratoj? Kiam vi kunvenas,
ĉiu havas psalmon, havas instruon, havas malkaŝaĵon,
havas lingvon, havas interpretaĵon. Ĉio fariĝu por
edifo. 27 Se oni parolas per lingvo, tio estu duope, aŭ
triope je plejmulto, kaj laŭvice; kaj unu interpretu;
28 sed se ne ĉeestas interpretanto, oni silentu en la
eklezio; kaj li parolu al si kaj al Dio. 29 Kaj la profetoj
parolu duope aŭ triope, kaj la aliaj interdiferencigu.
30 Sed se al alia apudsidanta io malkaŝiĝos, la unua
silentu. 31 Ĉar vi ĉiuj povas profeti unuope laŭvice,
por ke ĉiuj lernu, kaj ĉiuj ricevu konsilon; 32 kaj la
spiritoj de la profetoj estas submetataj al la profetoj;
33 ĉar Dio estas Dio ne de konfuzo, sed de paco; kiel en
ĉiuj eklezioj de la sanktuloj. 34 La virinoj silentadu en
la eklezioj; ĉar ne estas permesate al ili paroli, sed
ili submetiĝu, kiel ankaŭ diras la leĝo. 35 Kaj se ili
volas lerni ion, ili demandu al siaj edzoj hejme; ĉar
estas honte por virino paroli en la eklezio. 36 Kio? ĉu
el vi la vorto de Dio eliris? ĉu ĝi venis al vi solaj? 37
Se iu ŝajnas al si esti profeto aŭ laŭspirita, li sciiĝu
pri tio, kion mi skribas al vi, ke ĝi estas la ordono de
la Sinjoro. 38 Sed se iu ne scias, li ne sciu. 39 Tial,
fratoj, deziregu profeti, kaj ne malpermesu paroli per
lingvoj. 40 Sed ĉio fariĝu konvene kaj laŭorde.

**15** Kaj mi sciigas vin, fratoj, pri la evangelio, kiun mi
predikis al vi, kiun ankaŭ vi ricevis, en kiu ankaŭ
vi staras, 2 per kiu vi saviĝis; se vi en memoro tenas,
per kiuj vortoj mi ĝin predikis al vi, krom se vi kredis
vane. 3 Ĉar mi transdonis al vi komence tion, kion mi
ankaŭ ricevis, ke Kristo mortis pro niaj pekoj laŭ la
Skriboj; 4 kaj ke li estis entombigita; kaj ke li releviĝis
la trian tagon laŭ la Skriboj; 5 kaj ke li aperis al Kefas;
poste al la dek du; 6 poste li aperis al pli ol kvincent
fratoj samtempe, el kiuj la plimulto restas ĝis nun, sed
kelkaj jam ekdormis; 7 poste li aperis al Jakobo; poste
al ĉiuj apostoloj; 8 kaj fine li aperis al mi ankaŭ, kiel
al infano ekstertempe naskita. 9 Ĉar mi estas la plej
malgranda el la apostoloj, kaj ne meritas esti nomata
apostolo pro tio, ke mi persekutis la eklezion de Dio.
10 Sed per la graco de Dio mi estas tio, kio mi estas;
kaj Lia graco donacita al mi montriĝis ne vana; sed mi
laboregis pli abunde ol la ceteraj; tamen ne mi, sed la
graco de Dio, kiu estis kun mi. 11 Ĉu do mi, ĉu ili, tiel
ni predikas, kaj tiel vi kredis. 12 Nu, se Kristo estas

predikata, ke li releviĝis el la mortintoj, kiel do diras
kelkaj el vi, ke ne ekzistas releviĝo de mortintoj? 13
Sed se ne ekzistas releviĝo de mortintoj, ankaŭ Kristo
ne releviĝis; 14 kaj se Kristo ne releviĝis, vana ja estas
nia predikado, vana ankaŭ estas via fido. 15 Jes, kaj
ni montriĝas kiel falsaj atestantoj de Dio; tial ke ni
atestis pri Dio, ke Li relevis Kriston; kiun Li ne relevis,
se la mortintoj ja ne releviĝas. 16 Ĉar se la mortintoj
ne releviĝas, ankaŭ Kristo ne releviĝis; 17 kaj se Kristo
ne releviĝis, via fido estas vana; vi estas ankoraŭ en
viaj pekoj. 18 Tiuokaze ankaŭ pereis la ekdormintoj en
Kristo. 19 Se nur en ĉi tiu vivo ni esperis en Kristo, ni
estas el ĉiuj homoj la plej mizeraj. 20 Sed nun Kristo
releviĝis el la mortintoj, la unuaaĵo de la dormantoj.
21 Ĉar tial, ke per homo venis la morto, per homo
ankaŭ venis la releviĝo de la mortintoj. 22 Ĉar kiel
en Adam ĉiuj mortas, tiel same ankaŭ en Kristo ĉiuj
estos vivigitaj. 23 Sed ĉiu en sia propra vico: Kristo
la unuaaĵo, poste tiuj, kiuj apartenas al Kristo, ĉe lia
alveno. 24 Poste venos la fino, kiam li transdonos la
reĝecon al Dio, al la Patro; kiam li estos neniiginta
ĉian regadon kaj ĉian aŭtoritaton kaj potencon. 25
Ĉar li devas reĝadi, ĝis li metos ĉiujn malamikojn sub
siajn piedojn. 26 La lasta neniigota malamiko estas la
morto. 27 Ĉar: Ĉion Li metis sub liajn piedojn. Sed
kiam estas dirate: Ĉio estas submetita, estas evidente,
ke esceptita estas Tiu, kiu submetis ĉion al li. 28 Kaj
kiam ĉio estos submetita al li, tiam la Filo ankaŭ mem
estos submetita al Tiu, kiu submetis ĉion al li, por ke
Dio estu ĉio en ĉio. 29 Alie kion faros tiuj, kiuj baptiĝas
pro la mortintoj? Se la mortintoj tute ne releviĝas, kial
do ili baptiĝas pro ili? 30 kial ni ankaŭ endanĝeriĝas
ĉiun horon? 31 Mi asertas per la singratulado pro vi,
fratoj, kiun mi havas en Kristo Jesuo, nia Sinjoro, mi
mortas ĉiutage. 32 Se laŭ homa maniero mi batalis
kontraŭ bestoj en Efeso, kiel mi per tio profitas? Se
la mortintoj ne releviĝas, ni manĝu kaj trinku, ĉar
morgaŭ ni mortos. 33 Ne trompiĝu; Malbonaj kuniĝoj
malbonigas bonajn morojn. 34 Malebriiĝu en justeco,
kaj ne peku; ĉar kelkaj havas nenian scion pri Dio;
mi tion diras, por hontigi vin. 35 Sed iu diros: Kiel la
mortintoj releviĝas? kaj kun kia korpo ili venas? 36
Ho malsaĝulo! tio, kion vi mem semas, ne viviĝas,
se ĝi ne mortos; 37 kaj tio, kion vi semas, estas ne la
estonta korpo, sed nuda grenero, eble de tritiko, aŭ de
alia speco; 38 sed Dio donas al ĝi korpon, kiel Li volis,
kaj al ĉiu semo ĝian propran korpon. 39 Ne ĉiu karno
estas unu sama karno; sed ekzistas unu karno de
homoj, kaj alia de bestoj, kaj alia karno de birdoj, kaj
alia de fiŝoj. 40 Ekzistas ankaŭ korpoj ĉielaj kaj korpoj
teraj; sed la gloro de la ĉielaj estas unu, kaj la gloro de
la teraj estas alia. 41 Ekzistas unu gloro de la suno, kaj
alia gloro de la luno, kaj alia gloro de la steloj; ĉar unu
stelo diferencas de alia stelo rilate al gloro. 42 Tia
sama ankaŭ estas la releviĝo de la mortintoj. Ĝi estas
semata en putreco, ĝi releviĝas en senputreco; 43 ĝi
estas semata en malhonoro, ĝi releviĝas en gloro; ĝi
estas semata en malforteco, ĝi releviĝas en potenco; 44
ĝi estas semata laŭanima korpo, ĝi releviĝas laŭspirita
korpo. Se ekzistas laŭanima korpo, ekzistas ankaŭ
laŭspirita korpo. 45 Tiele ankaŭ estas skribite: La unua
homo Adam fariĝis viva animo. La lasta Adam fariĝis
viviganta spirito. 46 Tamen unua estas ne tio, kio
estas laŭspirita, sed tio, kio estas laŭanima; poste tio,
kio estas laŭspirita. 47 La unua homo estas el la tero,
elpolva; la dua homo estas el la ĉielo. 48 Kia estas la
elpolvulo, tiaj estas ankaŭ la elpolvuloj; kaj kia estas
la elĉielulo, tiaj estas ankaŭ la elĉieluloj. 49 Kaj kiel ni
portis la figuron de la elpolvulo, tiel same ni portos
la figuron de la elĉielulo. 50 Kaj la jenon mi diras,
fratoj, ke karno kaj sango ne povas heredi la regnon
de Dio; kaj putreco ne heredas senputrecon. 51 Jen
mi sciigas al vi misteron: Ni ne ĉiuj dormos, sed ni
ĉiuj ŝanĝiĝos, 52 en momento, en okula ekmovo, ĉe
la lasta trumpetsono: ĉar la trumpeto sonos, kaj la
mortintoj releviĝos senputraj, kaj ni ŝanĝiĝos. 53 Ĉar
estas necese, ke ĉi tiu putrema surmetu senputrecon,
kaj ke ĉi tiu mortema surmetu senmortecon. 54 Sed
kiam ĉi tiu putrema surmetos senputrecon, kaj ĉi tiu
mortema surmetos senmortecon, tiam plenumiĝos la
skribita diro: La morto forglutiĝis en venko. 55 Ho
morto, kie estas via venko? Ho morto, kie estas via
pikilo? **(Hadēs g86)** 56 La pikilo de la morto estas la peko;
kaj la forto de la peko estas la leĝo; 57 sed danko
estu al Dio, kiu donas al ni la venkon per nia Sinjoro
Jesuo Kristo. 58 Tial, miaj amataj fratoj, estu firmaj,
nemoveblaj, ĉiam abundaj en la laboro de la Sinjoro,
sciante, ke via penado ne estas vanta en la Sinjoro.

**16** Nun rilate al la monkolekto pro la sanktuloj,
kiel mi ordonis al la eklezioj de Galatujo, tiel
ankaŭ vi faru. 2 La unuan tagon de la semajno, ĉiu
el vi provizu ĉe si laŭ tio, kion li prospere akiris,
por ke ne estu kolektoj tiam, kiam mi venos. 3 Kaj

kiam mi alvenos, kiujn vi per leteroj aprobos, tiujn mi
sendos, por alporti vian donacon al Jerusalem; 4 kaj
se konvenos, ke mi ankaŭ tien vojaĝu, ili vojaĝos kun
mi. 5 Sed mi venos al vi, kiam mi estos trapasinta
Makedonujon; ĉar Makedonujon mi ja trapasos; 6
sed ĉe vi eble mi restos, aŭ eĉ travintros, por ke vi
antaŭen irigu min, kien mi veturos. 7 Ĉar mi ne volas
vidi vin nun dumvojaĝe; ĉar mi esperas resti kelkan
tempon ĉe vi, se la Sinjoro permesos. 8 Sed mi restos
en Efeso ĝis Pentekosto; 9 ĉar pordo granda kaj efika
malfermiĝis al mi, kaj estas multaj kontraŭstarantoj.
10 Se Timoteo venos, zorgu, ke li estu ĉe vi sentime;
ĉar li faras la laboron de la Sinjoro, kiel mi ankaŭ; 11
neniu do lin malestimu. Sed antaŭen irigu lin en paco,
por ke li venu al mi; ĉar mi atendas lin kun la fratoj.
12 Sed rilate al la frato Apolos, mi multe petegis lin
veni al vi kun la fratoj; sed tute mankis volo veni nun;
sed li venos, kiam li havos oportunan tempon. 13
Viglu, staru firme en la fido, viriĝu, fortiĝu. 14 Ĉio
via estu farata en amo. 15 Mi petegas vin, fratoj (vi
konas la domon de Stefanas, ke ĝi estas la unuaaĵo de
la Aĥaja lando, kaj ke ili sin dediĉis al la servo de la
sanktuloj), 16 ke vi ankaŭ submetiĝu al tiaj, kaj al ĉiu
kunhelpanto kaj kunlaboranto. 17 Kaj mi ĝojas pro la
alveno de Stefanas kaj Fortunato kaj Aĥaiko, tial, ke
vian mankaĵon ili plenigis. 18 Ĉar ili refreŝigis mian
spiriton kaj vian; rekonu do tiajn. 19 La eklezioj de
Azio vin salutas. Akvila kaj Priskila vin salutas multe
en la Sinjoro, kune kun la eklezio en ilia domo. 20 Ĉiuj
fratoj vin salutas. Salutu unu la alian per sankta kiso.
21 La saluto de mi, Paŭlo, per mia propra mano. 22 Se
iu ne amas la Sinjoron Jesuo Kristo, li estu anatemita.
Maran-ata. 23 La graco de la Sinjoro Jesuo Kristo estu
kun vi. 24 Mia amo estu kun vi ĉiuj en Kristo Jesuo.
Amen.

# 2 Korintanoj

**1** Paŭlo, apostolo de Kristo Jesuo per la volo de Dio,
kaj la frato Timoteo, al la eklezio de Dio, kiu estas
en Korinto, kune kun ĉiuj sanktuloj, kiuj estas en la
tuta Aĥaja lando: 2 Graco al vi kaj paco de Dio, nia
Patro, kaj de la Sinjoro Jesuo Kristo. 3 Benata estu
la Dio kaj Patro de nia Sinjoro Jesuo Kristo, la Patro
de kompatoj kaj Dio de ĉia konsolo; 4 kiu konsoladas
nin en nia tuta aflikto, por ke ni povu konsoli tiujn,
kiuj iel afliktiĝas, per la konsolo, per kiu ni mem
estas konsolataj de Dio. 5 Ĉar kiel la suferoj de Kristo
abundas ĉe ni, tiel same abundas ankaŭ per Kristo
nia konsolo. 6 Sed se ni afliktiĝas, tio estas por via
konsolo kaj saviĝo; aŭ se ni konsoliĝas, tio estas por
via konsolo, kiu energias, per la pacienca elportado
de la samaj suferoj, kiujn ni ankaŭ suferadas; 7 kaj
nia espero pri vi estas firma, ĉar ni scias, ke kiel vi
estas partoprenantoj en la suferoj, tiel ankaŭ vi estas
partoprenantoj en la konsolo. 8 Ĉar ni ne volas, ke vi
nesciu, fratoj, pri la aflikto, kiu okazis al ni en Azio, ke
ni ekstreme super la forto estis depremitaj, tiel, ke
ni forte malesperis, eĉ pri la vivo; 9 ni ja ricevis la
aljuĝon al morto en ni mem, por ke ni fidu ne nin
mem, sed Dion, kiu levas la mortintojn, 10 kaj kiu nin
forsavis el tia granda morto kaj forsavos; al kiu ni
esperis, ke Li ankoraŭ plu nin forsavos; 11 dum vi
ankaŭ nin kunhelpas per via petegado, por ke, pro
la donaco donita al ni per multaj personoj, danko
estu donata de multaj pro ni. 12 Ĉar jen estas nia
singratulado, nome la atesto de nia konscienco, ke en
sankteco kaj sincereco antaŭ Dio, ne laŭ homa saĝeco,
sed laŭ la graco de Dio, ni kondutadis en la mondo, kaj
precipe ĉe vi. 13 Ĉar ni skribas al vi nenion alian krom
tio, kion vi legas kaj prikonsentas, kaj mi esperas,
ke vi prikonsentos ĝis la fino; 14 kiel ankaŭ vi ja
parte prikonsentis pri ni, ke ni estas via singratulado,
tiel same, kiel vi ankaŭ estas la nia en la tago de
nia Sinjoro Jesuo. 15 Kaj en ĉi tiu fidado mi intencis
veni unue al vi, por ke vi havu duoblan gracon, 16
kaj vizitinte vin survoje, trairi en Makedonujon, kaj
denove el Makedonujo veni al vi, kaj de vi esti antaŭen
irigita al Judujo. 17 Kiam mi do tiel intencis, ĉu mi
elmontris kapricemon? aŭ kion mi celas, ĉu mi tion
celas laŭkarne, tiel ke estu ĉe mi la Jes, Jes, kaj la Ne,
Ne? 18 Sed, kiel Dio estas fidela, nia parolo al vi ne
estas Jes kaj Ne. 19 Ĉar la Filo de Dio, Jesuo Kristo, kiu
de ni estas predikita inter vi, de mi kaj Silvano kaj
Timoteo, ne estis Jes kaj Ne, sed en li la Jes estiĝis. 20
Ĉar kiel ajn multaj estas la promesoj de Dio, en li estas
la Jes; tial ankaŭ per li estas la Amen, por la gloro al
Dio per ni. 21 Kaj tiu, kiu fortikigas nin kune kun vi en
Kristo kaj sanktoleis nin, estas Dio, 22 kiu ankaŭ nin
sigelis kaj donis al ni la antaŭgarantiaĵon de la Spirito
en niaj koroj. 23 Sed mi vokas Dion kiel atestanton sur
mian animon, ke por indulgi vin mi ankoraŭ ne venis
al Korinto. 24 Ne kvazaŭ ni estrus super via fido, sed
ni estas kunhelpantoj de via ĝojo; ĉar per via fido vi
staras.

**2** Sed mi decidis por mi mem, ke mi ne venos al vi
denove en malĝojo. 2 Ĉar se mi vin malĝojigas, kiu
do min ĝojigas, krom tiu, kiu estas malĝojigata de mi?
3 Kaj mi skribis tion saman, por ke, veninte, mi ne
havu malĝojon de tiuj, pri kiuj mi devus ĝoji, fidante
pri vi ĉiuj, ke mia ĝojo estas la ĝojo de vi ĉiuj. 4 Ĉar
el multe da aflikto kaj kora dolorego mi skribis al vi
kun multaj larmoj, ne por ke vi malĝoju, sed ke vi
sciu la amon, kiun mi havas al vi abunde. 5 Sed se
iu kaŭzis malĝojon, li kaŭzis malĝojon ne al mi, sed
parte (por ne tro forte vin premi) al vi ĉiuj. 6 Sufiĉa al
tia homo estas tiu puno, farita de la plimulto; 7 pro
tio, kontraŭe, vi devus lin pardoni kaj konsoli, por ke
tia homo neniel forglutiĝu per sia troa malĝojo. 8 Tial
mi petegas vin, ke vi konfirmu al li vian amon. 9 Ĝuste
por tio mi ja skribis, ke mi vin provu, ĉu vi en ĉio estas
obeemaj. 10 Sed al kiu vi pardonas ion, mi ankaŭ;
ĉar kion mi ankaŭ pardonis, se mi ion pardonis, mi
tion faris pro vi antaŭ Kristo, 11 por ke Satano ne
gajnu profiton kontraŭ ni: ĉar ni ne estas sen scio pri
liaj ruzoj. 12 Kiam mi venis al Troas, por disvastigi
tie la evangelion de Kristo, kaj kiam en la Sinjoro
malfermiĝis al mi pordo, 13 mi ne ricevis ripozon por
mia spirito, ĉar mi ne trovis mian fraton Tito; sed mi
adiaŭis ilin kaj foriris al Makedonujo. 14 Sed danko
estu al Dio, kiu ĉiam kondukadas nin triumfe en Kristo
kaj montras ĉie per ni la bonodoron de Sia koniĝo. 15
Ĉar ni estas al Dio dolĉa odoro de Kristo, en la savatoj,
kaj en la pereantoj; 16 al ĉi tiuj, odoro de morto al
morto; al tiuj, odoro de vivo al vivo. Kaj kiu estas
taŭga por ĉi tio? 17 Ĉar ni ne similas al multaj, kiuj
faras la vorton de Dio komercaĵo; sed kun sincereco,
kaj kiel per Dio, antaŭ Dio ni parolas en Kristo.

3 Ĉu ni denove komencas nin mem rekomendi? aŭ
ĉu ni bezonas, kiel iuj, leterojn rekomendajn al vi,
aŭ de vi? 2 Vi mem estas nia letero, skribita sur nia
koro, kaj konata kaj legata de ĉiuj; 3 ĉar vi montriĝis,
ke vi estas letero de Kristo liverita per ni, skribita
ne per inko, sed per la Spirito de la vivanta Dio;
ne sur ŝtonaj tabeloj, sed sur la karnaj tabeloj de
la koro. 4 Kaj tian fidon ni havas per Kristo al Dio;
5 ne kvazaŭ ni taŭgas ion fari per ni mem, sed nia
taŭgeco estas el Dio, 6 kiu ankaŭ taŭgigis nin kiel
administrantojn de nova interligo, ne laŭ litero, sed
laŭ spirito; ĉar la litero mortigas, sed la spirito vivigas.
7 Sed se la administrado mortiga, esprimita per literoj
kaj enĉizita sur ŝtonoj, estiĝis en gloro, tiel, ke la
Izraelidoj ne povis fikse rigardi la vizaĝon de Moseo
pro lia vizaĝa brileco, jam tamen malpliiĝanta, 8 kiel
do la administrado spirita ne estos pli multe en gloro?
9 Ĉar se la administrado de kondamno estas gloro,
multe pli abunde la administrado de justeco superas
en gloro. 10 Ĉar vere tio, kio havis gloron, ne estis
glorigita en ĉi tiu rilato, pro la superabunda gloro.
11 Ĉar se tio, kio forpasas, havis gloron, ankoraŭ pli
multe tio, kio restadas, estas en gloro. 12 Havante do
tian esperon, ni uzas grandan liberecon de parolo, 13
kaj ne kiel Moseo, kiu metis vualon sur sian vizaĝon,
por ke la Izraelidoj ne fikse rigardu ĝis finiĝo de tio,
kio estis forpasanta; 14 sed iliaj animoj sensentiĝis; ĉar
eĉ ĝis hodiaŭ, ĉe la legado de la malnova testamento,
nelevita restadas tiu sama vualo, kiu estas forigita en
Kristo, 15 sed ĝis hodiaŭ, kiam ajn oni legas Moseon,
vualo kuŝas sur ilia koro. 16 Sed kiam ajn oni turnas sin
al la Sinjoro, la vualo estas forprenata. 17 La Sinjoro
estas la Spirito; kaj kie estas la Spirito de la Sinjoro,
tie estas libereco. 18 Sed ni ĉiuj, per nevualita vizaĝo
spegulante la gloron de la Sinjoro, transformiĝas en
la saman bildon, de gloro al gloro, kiel el la Sinjoro la
Spirito.

4 Pro tio, ke ni havas ĉi tiun administradon, kiel
ni ricevis kompaton, ni ne senkuraĝiĝas; 2 sed
ni formetis la kaŝitajn aferojn de honto, ne irante
kun ruzeco kaj ne falsante la vorton de Dio, sed
per elmontro de la vero rekomendante nin al ĉies
konscienco antaŭ Dio. 3 Sed se nia evangelio eble
estas vualita, ĝi estas vualita rilate al tiuj, kiuj pereas;
4 en kiuj la dio de ĉi tiu mondo blindigis la animojn
de la nekredantoj, por ke la lumo de la evangelio
de la gloro de Kristo, kiu estas la bildo de Dio, ne
brilu sur ilin. (aiōn g165) 5 Ĉar ni predikadas ne nin
mem, sed Kriston Jesuon kiel Sinjoron, kaj nin mem
kiel viajn servistojn pro Jesuo. 6 Ĉar Dio, kiu diris:
El mallumo lumo brilos, Tiu brilis en niaj koroj, por
doni lumon de la scio de la gloro de Dio en la vizaĝo
de Jesuo Kristo. 7 Sed ni havas ĉi tiun trezoron en
argilaj vazoj, por ke la treega grandeco de la potenco
estu de Dio, kaj ne de ni mem; 8 ni estas premegataj
ĉe ĉiu flanko, tamen ne enanguligitaj; embarasataj,
sed ne konsternataj; 9 persekutataj, sed ne forlasataj;
faligataj, sed ne detruataj; 10 ĉiam portante en la
korpo la mortiĝon de Jesuo, por ke la vivo ankaŭ de
Jesuo elmontriĝu en nia korpo. 11 Ĉar ni, la vivantoj,
ĉiam estas submetataj al morto pro Jesuo, por ke la
vivo ankaŭ de Jesuo elmontriĝu en nia morta karno.
12 La morto do energias en ni, sed la vivo en vi. 13
Sed havante la saman spiriton de fido laŭ la skribo:
Mi kredis, kaj tial mi parolis; ni ankaŭ kredas, kaj
tial ankaŭ ni parolas; 14 sciante, ke Tiu, kiu levis
la Sinjoron Jesuo, levos nin ankaŭ kun Jesuo kaj
prezentos nin kun vi. 15 Ĉar ĉio estas pro vi, por ke la
graco, multobligita per multaj, abundigu la dankon
al la gloro de Dio. 16 Pro tio ni ne senkuraĝiĝas; sed
kvankam nia ekstera homo kadukiĝas, tamen nia
interna homo renoviĝas tagon post tago. 17 Ĉar nia
malpeza kaj momenta sufero elfaras por ni, pli kaj pli
ekster mezuro, eternan pezon da gloro; (aiōnios g166) 18
dum ni rigardas ne la vidataĵojn, sed la nevidataĵojn;
ĉar la vidataĵoj estas tempaj, sed la nevidataĵoj estas
eternaj. (aiōnios g166)

5 Ĉar ni scias, ke se la surtera loĝejo de nia tabernaklo
dissolviĝos, ni havas de Dio konstruaĵon, domon
ne manfaritan, eternan en la ĉieloj. (aiōnios g166) 2 Ĉar
vere en ĉi tiu ni ĝemas, sopirante al la survestado
per nia loĝejo, kiu devenas de la ĉielo; 3 se almenaŭ,
vestite, ni ne troviĝos nudaj. 4 Ĉar ni, kiuj estas en
ĉi tiu tabernaklo, ĝemas ŝarĝite, ne pro tio, ke ni
deziras senvestiĝi, sed ĉar ni deziras survestiĝi, por
ke la mortaĵo estu elsorbita de la vivo. 5 Kaj Tiu, kiu
nin elfaris por ĉi tiu celo, estas Dio, kiu donis al ni
la antaŭgarantiaĵon de la Spirito. 6 Ni do ĉiam ĝoje
kuraĝas, kaj ni scias, ke dum ni ĉeestas en la korpo, ni
forestas de la Sinjoro 7 (ĉar ni iradas fide, ne vide);
8 ni ĝoje kuraĝas, kaj ni plivolas foresti de la korpo
kaj ĉeesti kun la Sinjoro. 9 Tial ankaŭ ni ambicias,

ĉu ĉeestante aŭ forestante, esti akceptindaj ĉe li. 10
Ĉar ni ĉiuj devos elmontriĝi antaŭ la tribunala seĝo
de Kristo, por ke ĉiu ricevu tion, kion li faris en la
korpo, laŭ siaj faritaĵoj, ĉu bonaj aŭ malbonaj. 11
Sciante do la timon al la Sinjoro, ni celas konvinki
homojn, sed ni ja elmontriĝas al Dio; kaj ni esperas,
ke ni elmontriĝas ankaŭ al viaj konsciencoj. 12 Ni ne
denove nin rekomendas al vi, sed donas al vi kaŭzon
fieriĝi pri ni, por ke vi havu ion respondi al tiuj, kiuj
fieriĝas ŝajne kaj ne kore. 13 Ĉar ĉu ni estis frenezaj,
tio estis pro Dio, aŭ ĉu ni estas seriozaj, tio estas pro
vi. 14 Ĉar la amo de Kristo nin devigas; ĉar ni juĝas
jene, ke ĉar unu mortis pro ĉiuj, tial ĉiuj mortis; 15 kaj
li mortis pro ĉiuj, por ke la vivantoj jam vivu ne por si
mem, sed por tiu, kiu pro ili mortis kaj releviĝis. 16
Tial ni de nun konas neniun laŭkarne; eĉ kvankam
ni konis Kriston laŭkarne, tamen ni ne plu lin tiel
konas. 17 Tial se iu homo estas en Kristo, estas jam
nova kreitaĵo; la malnovaĵoj forpasis, jen ili jam estiĝis
novaj. 18 Sed ĉio estas de Dio, kiu repacigis nin al Si
mem per Kristo kaj donis al ni la administradon de la
repacigo; 19 nome, ke Dio estis en Kristo, repacigante
la mondon al Si, ne alkalkulante al ili la kulpojn, kaj
komisiis al ni la vorton repacigan. 20 Ni do estas
ambasadoroj pro Kristo, kvazaŭ Dio per ni petadus; ni
vin petegas pro Kristo, repaciĝu al Dio. 21 Tiun, kiu
ne konis pekon, Li faris peko pro ni; por ke ni fariĝu
justeco de Dio en li.

6 Kaj kunlaborante kun li, ni petegas ankaŭ, ke vi
ne vane akceptu la gracon de Dio 2 (ĉar Li diris:
En tempo de favoro Mi aŭskultis vin, Kaj en tago de
savo Mi helpis vin; jen nun la tempo de favoro; jen
nun la tago de savo); 3 ni donu en nenio okazon por
maledifo, por ke oni ne kulpigu nian administradon;
4 sed en ĉio ni aprobigu nin, kiel servantoj de Dio, en
multa pacienco, en suferoj, en afliktoj, en malfacilaĵoj,
5 en batovundoj, en malliberigoj, en tumultoj, en
laboroj, en maldormoj, en malsatoj, 6 en ĉasteco, en
sciado, en pacienco, en afableco, en Spirito Sankta,
en amo senhipokrita, 7 en la vorto de vero, en la
potenco de Dio; per la armaĵo de justeco dekstre kaj
maldekstre, 8 per gloro kaj malgloro, per malbonfamo
kaj bonfamo; kiel trompantoj, tamen veraj; 9 kiel
nekonataj, tamen bone konataj; kiel mortantaj, kaj jen
ni vivas; kiel pune korektataj, tamen ne mortigataj; 10
kiel dolorplenaj, tamen ĉiam ĝojantaj; kiel malriĉaj,
tamen multajn riĉigantaj; kiel nenion havantaj, tamen
posedantaj ĉion. 11 Nia buŝo estas malfermita al vi, ho
Korintanoj, nia koro estas plivastigita. 12 Vi ne estas
malvastigitaj en ni, sed vi estas malvastigitaj en viaj
propraj internaĵoj. 13 Pro rekompenco samspeca do
(mi parolas kiel al infanoj) vi ankaŭ estu plivastigitaj.
14 Ne estiĝu kunjuguloj maltaŭge kun nekredantoj;
ĉar kian partoprenon havas justeco kun maljusteco?
aŭ kian komunaĵon havas lumo kun mallumo? 15
Kaj kian akordon havas Kristo kun Belial? aŭ kian
kunecon havas kredanto kun nekredanto? 16 Kaj kian
konsenton havas templo de Dio kun idoloj? ĉar ni
estas templo de Dio vivanta; kiel diris Dio: Mi loĝos
inter ili, kaj Mi iros inter ili; kaj Mi estos ilia Dio, kaj
ili estos Mia popolo. 17 Tial Eliru el inter ili, kaj estu
apartaj, diras la Eternulo, Kaj ne tuŝu malpuraĵon;
Kaj Mi vin akceptos, 18 Kaj Mi estos por vi Patro,
Kaj vi estos Miaj filoj kaj filinoj, diras la Eternulo
Plejpotenca.

7 Havante do ĉi tiujn promesojn, amataj, ni purigu nin
de ĉia malpureco karna kaj spirita, perfektigante
sanktecon en la timo al Dio. 2 Malfermu al ni viajn
korojn; ni kontraŭ neniu maljuste agis, ni ruinigis
neniun, al neniu ni friponis. 3 Ne por vin kondamni
mi tion diras; ĉar mi antaŭe diris, ke vi estas en niaj
koroj, por kune vivi kaj kune morti. 4 Granda estas mia
parola libereco al vi, granda estas mia fiereco pri vi:
mi estas plena de konsolo, al mi superabundas la ĝojo
meze de nia tuta aflikto. 5 Ĉar eĉ kiam ni jam alvenis
en Makedonujon, nia karno tute ne faciliĝis, sed ni
ĉiel depremiĝis; ekstere estis bataloj, interne timoj. 6
Tamen Dio, kiu konsolas la humilulojn, konsolis nin
per la alveno de Tito; 7 kaj ne nur per lia alveno,
sed ankaŭ per la konsolo, per kiu li konsoliĝis pri
vi, dum li pridiris al ni vian sopiron, vian doloron,
vian fervoron pro mi; tiel, ke mi ankoraŭ pli ĝojis. 8
Ĉar kvankam mi vin malĝojigis per mia epistolo, mi
ne bedaŭras pri tio, kvankam mi ja bedaŭris; ĉar mi
vidas, ke tiu epistolo vin malĝojigis, sed nur mallonge.
9 Mi nun ĝojas, ne pro tio, ke vi malĝojis, sed pro tio,
ke vi malĝojis ĝis pento; ĉar vi laŭ Dio malĝojis, por
ke vi havu nenian malutilon per ni. 10 Ĉar la malĝojo
laŭ Dio elfaras penton ĝis savo, ne bedaŭrindan; sed
la malĝojo de la mondo elfaras morton. 11 Ĉar jen
kian zorgemon tiu sama malĝojo laŭ Dio elfaris en
vi, plue kian senkulpigon, plue kian indignon, plue
kian timon, plue kian sopiron, plue kian fervoron,

plue kian venĝon! En ĉio vi elmontris vin puraj pri
la afero. 12 Tial kvankam mi skribis al vi, tamen tio
estis ne pro tiu, kiu faris la malbonon, nek pro tiu, kiu
suferis la malbonon, sed por ke via zorgemo por ni
elmontriĝu al vi mem antaŭ Dio. 13 Tial ni konsoliĝis;
kaj en nia konsolo ni ĝojis des pli multege pro la ĝojo
de Tito, ĉar lia animo estas refreŝigita de vi ĉiuj. 14
Ĉar se en io mi fanfaronis al li pro vi, mi ne hontis;
sed kiel ni ĉion parolis vereme al vi, tiel same ankaŭ
nia fanfaronado, kiun mi faris antaŭ Tito, montriĝis
vera. 15 Kaj lia interna amo pli abundas al vi, dum
li memoras la obeadon de vi ĉiuj, kiel kun timo kaj
tremo vi lin akceptis. 16 Mi ĝojas, ke en ĉio mi povas
fidi al vi.

8 Cetere, fratoj, ni sciigas al vi la gracon de Dio, kiu
estas donacita en la eklezioj Makedonaj; 2 nome,
en grava provo per suferado, la abundo de ilia ĝojo
kaj ilia profunda malriĉeco abundis al la riĉo de ilia
malavareco. 3 Ĉar mi konstatas, ke laŭ sia povo — jes,
kaj super sia povo — ili donis memvole, 4 petegante
nin per multe da petado fari tiun komplezon kaj la
komunan helpservadon al la sanktuloj; 5 kaj ne kiel
ni esperis, sed unue ili sin dediĉis al la Sinjoro, kaj
al ni per la volo de Dio. 6 Tiel, ke ni instigis Titon,
ke kiel li antaŭe komencis, tiel same li perfektigu en
vi ĉi tiun pluan gracon. 7 Sed kiel al vi ĉio abundas:
fido kaj parolo kaj scio kaj fervoro kaj via amo al ni,
tiel abundu al vi ankaŭ ĉi tiu graco. 8 Mi parolas
ne ordonante, sed provante per la fervoro de aliaj
la sincerecon de via amo ankaŭ. 9 Ĉar vi scias la
gracon de nia Sinjoro Jesuo Kristo, ke kvankam li estis
riĉa, tamen pro vi li fariĝis malriĉa, por ke vi per lia
malriĉeco fariĝu riĉaj. 10 Kaj en tio mi donas mian
opinion; ĉar ĉi tio utilas por vi, kiuj unuaj komencis,
antaŭ unu jaro, ne nur fari, sed ankaŭ voli. 11 Sed
nun kompletigu la faradon ankaŭ; tiel ke, kiel estis la
volonteco voli, tiel ankaŭ estu la plenumo el via havo.
12 Ĉar kie ekzistas la volonteco, ĝi estos akceptita laŭ
la havo, ne laŭ la nehavo. 13 Ĉar mi diras tion, ne
por ke aliaj estu faciligataj kaj vi premataj, 14 sed laŭ
egaleco: via abundo nuntempe fariĝu por ilia manko,
por ke ilia abundo fariĝu por via manko, por ke estu
egaleco; 15 kiel estas skribite: Tiu, kiu kolektis pli,
ne havis superflue, kaj tiu, kiu kolektis malpli, ne
havis mankon. 16 Sed danko estu al Dio, kiu metas
en la koron de Tito la saman zorgon pri vi. 17 Ĉar li
ja akceptis la instigon; sed estante mem tre fervora,
li ekiris al vi memvole. 18 Kaj ni sendis kune kun li
la fraton, kies laŭdo en la evangelio disvastiĝas tra
ĉiuj eklezioj; 19 kaj krom tio, li ankaŭ estis elektita de
la eklezioj, por vojaĝadi kune kun ni rilate al ĉi tiu
graco, kiun ni administradas al la gloro de la Sinjoro,
kaj por elmontri nian volontecon, 20 evitante tion,
ke iu riproĉus nin rilate al ĉi tiu monhelpo, kiun ni
administras; 21 ĉar ni celas aferojn konvenajn ne nur
antaŭ la Sinjoro, sed ankaŭ antaŭ homoj. 22 Kaj ni
sendis kune kun ili nian fraton, kiun ni ofte pruvis
fervora en multaj aferoj, sed nun multe pli fervora pro
la granda fido, kiun li havas al vi. 23 Se iu demandas
pri Tito, li estas mia kunulo kaj mia kunlaboranto
rilate al vi; se pri niaj fratoj, ili estas apostoloj de
eklezioj, la gloro de Kristo. 24 Vi do elmontru al ili
antaŭ la eklezioj la pruvon de via amo kaj de nia
fanfaronado pro vi.

9 Ĉar pri la servado al la sanktuloj estas por mi
superflue skribi al vi; 2 ĉar mi scias vian volontecon,
pri kiu mi fanfaronas pro vi al la Makedonoj, ke
la Aĥaja lando jam antaŭ unu jaro pretiĝis; kaj via
fervoro instigis la plimulton el ili. 3 Sed mi sendis la
fratojn, por ke nia fanfaronado pro vi ne fariĝu vanta
rilate al ĉi tio, sed, kiel mi diris, por ke vi estu pretaj,
4 por ke, se venus kune kun mi iuj el Makedonujo kaj
trovus vin ne pretaj, ni (por ne diri, vi) ne hontu pro
ĉi tiu fido. 5 Mi do opiniis necesa, peti la fratojn, ke
ili antaŭe iru al vi, kaj antaŭe pretigu vian de longe
promesitan helpmonon, por ke tio estu preta, kiel
volonte donita, kaj ne kiel eldevigita. 6 Sed jen: Tiu,
kiu semas ŝpare, ankaŭ rikoltos ŝpare; kaj tiu, kiu
semas malavare, ankaŭ rikoltos malavare. 7 Ĉiu faru
laŭ tio, kion li intencas en la koro, ne domaĝante,
nek pro neceseco; ĉar Dio amas donacanton ĝojan. 8
Kaj Dio povas abundigi ĉe vi ĉian gracon, por ke vi,
havante ĉiam en ĉio ĉian sufiĉecon, abunde rilatu al
ĉia bona faro; 9 kiel estas skribite: Li ŝutis kaj donis al
la malriĉuloj; Lia justeco restas eterne. (aiōn g165) 10 Kaj
Tiu, kiu donas semon al la semanto kaj panon por
nutraĵo, donos kaj multobligos vian semotan semon,
kaj plimultigos la fruktojn de via justeco; 11 dum vi
pliriĉiĝos en ĉio al ĉia malavareco, kiu efikas per ni
dankdonadon al Dio. 12 Ĉar la administrado de ĉi tiu
servado ne nur kompletigas la mezuron de la bezonoj
de la sanktuloj, sed ankaŭ abundas per multaj dankoj

al Dio; 13 ĉar provinte vin per ĉi tiu administrado, ili
gloras Dion pro la obeo de via konfeso al la evangelio
de Kristo, kaj pro la malavareco de via donaco al ili
kaj al ĉiuj; 14 dum ili mem ankaŭ, per petado por vi,
tre sopiras al vi pro la grandega graco de Dio en vi. 15
Danko estu al Dio pro Lia neesprimebla donaco.

10 Mi mem, Paŭlo, petegas vin pro la mildeco kaj
dolĉanimeco de Kristo, mi, kiu en via ĉeesto estas
humila inter vi, sed, forestante, tre kuraĝas rilate al
vi: 2 mi mem petegas vin, ke ĉeestante, mi ne kuraĝu
per la insisteco, per kiu mi bontrovas kuraĝi kontraŭ
iuj, kiuj rigardas nin kiel laŭkarne iradantajn. 3 Ĉar
kvankam ni iradas en karno, tamen ni ne militadas laŭ
karno 4 (ĉar la iloj de nia militado estas ne laŭkarnaj,
sed potencaj antaŭ Dio por la deĵetado de fortikaĵoj);
5 deĵetante diskutojn, kaj ĉian altaĵon levatan kontraŭ
la scio konforma al Dio, kaj ekkaptante ĉiun penson
al la obeo al Kristo, 6 kaj starante pretaj puni ĉian
malobeon, tuj kiam via obeo plenumiĝos. 7 Vi rigardas
la aferojn antaŭ via vizaĝo. Se iu fidas en si mem,
ke li apartenas al Kristo, li denove pripensu en si
mem, ke kiel li apartenas al Kristo, tiel same ankaŭ
ni. 8 Ĉar eĉ se mi fierus iom supermezure pri nia
aŭtoritato (kiun donis la Sinjoro, por vin edifi, kaj
ne por vin deĵeti), mi ne hontus; 9 por ke ne ŝajnu,
kvazaŭ mi volus timigi vin per miaj leteroj. 10 Ĉar, oni
diras, liaj leteroj estas gravaj kaj fortaj; sed lia korpa
aspekto estas malforta, kaj lia parolo malŝatinda. 11
Tiu homo konsideru, ke kiaj, forestante, ni estas per
leteroj, tiaj, ĉeestante, ni estas ankaŭ per agado. 12
Ĉar ni ne kuraĝas nin interkalkuli aŭ kompari kun
iuj el la sin rekomendantaj; ĉar ili estas neprudentaj,
mezurante sin laŭ si mem kaj komparante sin al si
mem. 13 Sed ni fieros ne pretermezure, sed laŭ la
amplekso de la mezurilo, kiun Dio destinis al ni, por
mezuri, por atingi eĉ ĝis vi. 14 Ĉar ni ne tro etendas
nin, kvazaŭ ni ne atingus ĝis vi; ĉar ni jam venis ĝis vi
en la evangelio de Kristo, 15 ne fierante pretermezure,
nome en laboroj malpropraj, sed esperante, ke dum
kreskos via fido, ni kreskos en vi laŭ nia mezurilo
ĝis plua abundo, 16 por prediki la evangelion ĝis la
regionoj preter vi, kaj ne fieri pri malpropra mezurilo
rilate al aferoj jam faritaj. 17 Sed kiu fieras, tiu fieru
en la Eternulo. 18 Ĉar ne tiu, kiu sin mem rekomendas,
estas akceptata, sed tiu, kiun rekomendas la Sinjoro.

11 Mi volas, ke vi pacience toleru min pro iom
da malsaĝeco; sed efektive vi ja pacience min
toleras. 2 Ĉar mi ĵaluzas pri vi per Dia ĵaluzo, ĉar
mi fianĉigis vin al unu edzo, por ke mi prezentu vin
kiel ĉastan virgulinon al Kristo. 3 Sed mi timas, ke
kiel trompis Evan la serpento per sia ruzeco, viaj
animoj iel dekliniĝos for de la simpleco kaj la ĉasteco,
kiu estas en Kristo. 4 Ĉar se iu vizitanto predikas
alian Kriston, kiun ni ne predikis, aŭ se vi ricevas
malsaman spiriton, kiun vi ne ricevis, aŭ malsaman
evangelion, kiun vi ne akceptis, facilanime vi lin
toleras. 5 Ĉar mi opinias, ke mi neniel malsuperas la
plej eminentajn apostolojn. 6 Kaj kvankam mi estas
neklera laŭ parolo, mi tamen ne tia estas laŭ scio;
sed en ĉio ni malkaŝe agis ĉe vi inter ĉiuj. 7 Aŭ ĉu mi
pekis, humiligante min, por ke vi estu altigitaj, en tio,
ke mi senpage predikis al vi la evangelion de Dio?
8 Mi senigis aliajn ekleziojn, ricevante de ili pagon,
por servi al vi; 9 kaj kiam mi ĉeestis ĉe vi kaj havis
mankon, mi ne estis ŝarĝo sur iu; ĉar la fratoj, veninte
el Makedonujo, plenigis la mezuron de mia bezono;
kaj en ĉio mi tenis min ne ŝarĝa rilate vin, kaj ankoraŭ
tenos. 10 Jen estas la vero de Kristo en mi, ke ĉi tiu
fanfarono ne estos barita kontraŭ mi en la regionoj
Aĥajaj. 11 Kial? ĉu tial, ke mi vin ne amas? Dio scias.
12 Sed kiel mi faras, tiel mi ankaŭ faros, por forigi la
pretekston al tiuj, kiuj deziras pretekston, por ke,
en kio ili fieras, ili troviĝu samaj, kiel ni. 13 Ĉar tiaj
homoj estas falsaj apostoloj, trompemaj laboristoj,
sin aliformante kvazaŭ apostolojn de Kristo. 14 Kaj
nenia miro; ĉar Satano mem sin aliformas kvazaŭ
anĝelon de lumo. 15 Estas do nenio granda, se liaj
servantoj ankaŭ sin aliformas kvazaŭ servantojn de
justeco; ilia finiĝo estos laŭ iliaj faroj. 16 Denove mi
diras: Neniu opiniu min malsaĝa; sed se vi ja tiel
opinias min, tamen min akceptu kiel malsaĝan, por
ke mi ankaŭ iom fanfaronu. 17 Tion, kion mi diras,
mi diras ne laŭ la Sinjoro, sed kvazaŭ malsaĝe, en ĉi
tiu insistado pri fierado. 18 Ĉar multaj fanfaronas laŭ
la karno, do mi ankaŭ fanfaronos. 19 Ĉar vi afable
toleras malsaĝulojn, estante mem saĝaj. 20 Ĉar vi
toleras homon, se li vin sklavigas, se li vin formanĝas,
se li vin kaptas, se li sin altigas, se li batas al vi la
vizaĝon. 21 Mi parolas kvazaŭ per sinmallaŭdo, kvazaŭ
ni estus malfortiĝintaj. Tamen pri kio iu kuraĝas, pri
tio (mi parolas en malsaĝeco) mi ankaŭ kuraĝas. 22 Ĉu
ili estas Hebreoj? mi ankaŭ. Ĉu ili estas Izraelidoj?

mi ankaŭ. Ĉu ili estas el la idaro de Abraham? mi
ankaŭ. 23 Ĉu ili estas servantoj al Kristo? (mi parolas
kiel frenezulo) mi plie; en laboroj pli abunde, en
malliberejoj pli abunde, en batoj supermezure, en
mortiĝoj ofte. 24 De la Judoj kvinfoje mi ricevis batojn
po kvardek sen unu. 25 Trifoje mi estas batita per
vergoj, unufoje mi estas priĵetita per ŝtonoj, trifoje
mi suferis ŝippereon, nokton kaj tagon mi pasis en
la profunda maro; 26 en oftaj vojaĝoj, en danĝeroj
de riveroj, danĝeroj de rabistoj, danĝeroj de Judoj,
danĝeroj de la nacianoj, danĝeroj en urbo, danĝeroj
en dezerto, danĝeroj en la maro, danĝeroj inter falsaj
fratoj; 27 en laboro kaj sufero, en oftaj sendormiĝoj,
en malsato kaj soifo, en oftaj fastoj, en malvarmo kaj
senvesteco. 28 Krom tiuj aferoj eksteraj estas tio, kio
min premas ĉiutage, nome la zorgado pri ĉiuj eklezioj.
29 Kiu estas malforta, kaj mi ne estas malforta? kiu
estas faligata, kaj mi ne indignas? 30 Se mi nepre
devas fanfaroni, mi fanfaronos pri tio, kio rilatas al
mia malforteco. 31 La Dio kaj Patro de la Sinjoro Jesuo,
Tiu, kiu ĉiam estas benata, scias, ke mi ne mensogas.
(aiōn g165) 32 En Damasko, la urbestro sub la reĝo Aretas
starigis gardistaron en la urbo de la Damaskanoj, por
min kapti; 33 kaj tra fenestro oni min delasis laŭflanke
de la muro en korbo, kaj mi eliĝis de liaj manoj.

12 Mi nepre devas fanfaroni, kvankam tio ne
konvenas; sed mi venos al vizioj kaj malkaŝoj de
la Sinjoro. 2 Mi konas viron en Kristo, antaŭ dek kvar
jaroj (ĉu en la korpo, mi ne scias, ĉu ekster la korpo,
mi ne scias; Dio scias) eklevitan ĝis en la trian ĉielon;
3 kaj mi scias pri la tiela viro (ĉu en la korpo, aŭ ekster
la korpo, mi ne scias; Dio scias), 4 ke li estis eklevita
en Paradizon, kaj aŭdis nedireblajn vortojn, kiujn ne
estas permesate al homo paroli. 5 Pro tia homo mi
fieros; sed pro mi mem mi ne fieros, krom rilate al
miaj malfortaĵoj. 6 Ĉar se mi deziros fieri, mi ne estos
malsaĝa; ĉar mi diros la veron; sed mi min detenas,
por ke neniu min opiniu supera ol tia, kia li vidas
min, aŭ aŭdas ĉe mi. 7 Kaj pro la treega grandeco de
la malkaŝoj — por ke mi ne tro altiĝu, estis donita
al mi dornego por la karno, sendito de Satano, por
min kontuzi, por ke mi ne tro altiĝu. 8 Pri tio mi
petegis trifoje la Sinjoron, ke ĝi foriru de mi. 9 Kaj li
diris al mi: Mia graco sufiĉas por vi, ĉar mia potenco
perfektiĝas en malforteco. Plej ĝoje do mi plivole
fieros pri miaj malfortaĵoj, por ke la potenco de Kristo
kovru min. 10 Mi do plezuron havas en malfortaĵoj,
en atencoj, en bezonegoj, en persekutoj, en suferoj,
pro Kristo; ĉar kiam mi estas malforta, tiam mi estas
forta. 11 Mi malsaĝiĝis: vi min devigis; ĉar mi devus
estis laŭdata de vi; ĉar en nenio mi malsuperis la plej
eminentajn apostolojn, kvankam mi estas nenio. 12
Vere la signoj de apostolo estis elfaritaj inter vi en ĉia
pacienco, per signoj kaj mirindaĵoj kaj potencaĵoj. 13
Ĉar en kio vi fariĝis malsuperaj kompare al la aliaj
eklezioj, krom en tio, ke mi mem ne ŝarĝiĝis al vi?
pardonu al mi ĉi tiun maljustaĵon. 14 Jen la trian
fojon mi min tenas preta veni al vi; kaj mi ne fariĝos
ŝarĝo por vi, ĉar mi celas ne viajn, sed vin; ĉar devus
provizi ne la idoj por la gepatroj, sed la gepatroj por
la idoj. 15 Kaj plej ĝoje mi elspezos kaj elspeziĝos
por viaj animoj. Se mi vin amas pli abunde, ĉu mi
estas des malpli amata? 16 Tio estu, tamen mi ne estis
ŝarĝo por vi; sed estante ruzema, mi vin kaptis per
logo. 17 Ĉu mi superruzis vin per iu el tiuj, kiujn mi
sendis al vi? 18 Mi instigis al Tito, kaj kune kun li
mi sendis la fraton. Ĉu Tito vin superruzis? ĉu ni ne
iradis laŭ la sama Spirito? ĉu ni ne iradis en la samaj
piedosignoj? 19 Vi ankoraŭ nun ĉiam pensas, ke ni
nin senkulpigas antaŭ vi. Antaŭ Dio, ni parolas en
Kristo. Sed ĉio, amataj miaj, estas por via edifo. 20 Ĉar
mi timas, ke veninte, mi iel ne trovos vin tiaj, kiajn
mi volas; kaj ke mi mem estos trovata tia, kian vi ne
volas; ke iel estos malpaco, ĵaluzo, koleroj, partioj,
kalumnioj, murmurado, ŝveliĝoj, tumultoj; 21 ke kiam
mi revenos, mia Dio min humiligos antaŭ vi, kaj mi
malĝojos pro multaj, kiuj jam antaŭe pekis kaj ne
pentis pri la malpureco kaj adulto kaj volupto, kiujn
ili faris.

13 Jen la trian fojon mi venas al vi. Laŭ la diro de
du atestantoj aŭ tri ĉiu vorto estu konfirmita. 2
Mi antaŭdiris, kaj mi nun antaŭdiras, kiel ĉeestante la
duan fojon, tiel nun forestante, al la jam pekintaj kaj
al ĉiuj ceteraj, ke se mi revenos, mi ne indulgos; 3
ĉar vi serĉas pruvon de tio, ke parolas en mi Kristo,
kiu rilate al vi ne estas malforta, sed energias en
vi; 4 ĉar li estis krucumita pro malforto, tamen
li vivas per la potenco de Dio. Ĉar ni ankaŭ estas
malfortaj kune kun li, sed ni vivos kune kun li per
la potenco de Dio rilate al vi. 5 Provu vin mem, ĉu
vi estas en la fido; ekzamenu vin mem. Aŭ ĉu vi ne
scias pri vi mem, ke Jesuo Kristo estas en vi? se ja

vi ne estas malaprobindaj. 6 Sed mi esperas, ke vi
sciiĝos, ke ni ne estas malaprobindaj. 7 Ni preĝas al
Dio, ke vi faru nenian malbonon; ne por tio, ke ni
montriĝu aprobataj, sed por ke vi faradu tion, kio
estas honorinda, eĉ kvankam ni estus malaprobindaj.
8 Ĉar ni ne povas fari ion kontraŭ la vero, sed nur por
la vero. 9 Ĉar ni ĝojas, kiam ni estas malfortaj kaj vi
estas fortaj; ankaŭ ni preĝas por via perfektiĝo. 10 Pro
tio mi skribas ĉi tion, forestante, por ke, ĉeestante,
mi ne agu severe laŭ la aŭtoritato, kiun la Sinjoro
donis al mi por edifado kaj ne por deĵetado. 11 Fine,
fratoj, adiaŭ. Perfektiĝu, konsoliĝu, estu unuanimaj,
vivu pace; kaj la Dio de amo kaj paco estos ĉe vi. 12
Salutu unu la alian per sankta kiso. 13 Ĉiuj sanktuloj
vin salutas. 14 La graco de la Sinjoro Jesuo Kristo kaj
la amo de Dio kaj la kuneco de la Sankta Spirito estu
kun vi ĉiuj.

# Galatoj

**1** Paŭlo, apostolo (ne de homoj, nek per homo, sed
per Jesuo Kristo, kaj Dio, la Patro, kiu levis lin
el la mortintoj), 2 kaj ĉiuj fratoj, kiuj estas kun mi,
al la eklezioj de Galatujo: 3 Graco al vi kaj paco de
Dio, la Patro, kaj de nia Sinjoro Jesuo Kristo, 4 kiu
sin donis pro niaj pekoj, por liberigi nin el la nuna
malbona mondo, laŭ la volo de nia Dio kaj Patro;
(aiōn g165) 5 al kiu estu la gloro por ĉiam kaj eterne.
Amen. (aiōn g165) 6 Mi miras, ke tiel rapide vi foriĝas
for de Tiu, kiu vokis vin en la gracon de Kristo, al
malsama evangelio; 7 kiu ja ne estas alia, sed troviĝas
iuj, kiuj vin maltrankviligas kaj deziras renversi la
evangelion de Kristo. 8 Tamen se eĉ ni, aŭ anĝelo el la
ĉielo, al vi instruus ian evangelion krom tiu, kiun ni
jam al vi instruis, tiu estu anatemita. 9 Kiel ni antaŭe
diris, tiel nun mi denove diras: Se iu al vi instruas
ian evangelion krom tiu, kiun vi ricevis, tiu estu
anatemita. 10 Ĉar ĉu mi nun influas homojn, aŭ Dion?
aŭ ĉu mi celas plaĉi al homoj? se mi ankoraŭ nun
plaĉus al homoj, mi ne estus servisto de Kristo. 11 Ĉar
mi sciigas vin, fratoj, rilate al la evangelio predikita
de mi, ke ĝi ne estas laŭ homo. 12 Ĉar mi ne ricevis
ĝin de homo, kaj ĝi ne estas instruita al mi krom per
malkaŝo de Jesuo Kristo. 13 Ĉar vi iam aŭdis pri mia
estinta vivmaniero en Judismo, ke mi forte persekutis
la eklezion de Dio kaj ĝin atakis; 14 kaj mi plimulte
progresis en Judismo, ol multaj miaj samaĝuloj en mia
nacio, estante multe pli fervoranima pri la tradicioj
de miaj prapatroj. 15 Sed kiam bonvole plaĉis al Dio,
kiu el la ventro de mia patrino apartigis min kaj
per Sia graco min vokis, 16 por malkaŝi en mi Sian
Filon, por ke mi prediku lin inter la nacianoj: mi ne
konsiliĝis kun karno kaj sango, 17 kaj mi ne supreniris
al Jerusalem, al la antaŭ mi apostoloj, sed mi tuj
foriris en Arabujon, kaj poste mi revenis al Damasko.
18 Tiam, post tri jaroj, mi supreniris al Jerusalem, por
viziti Kefason, kaj mi restis kun li dek kvin tagojn. 19
Sed neniun alian el la apostoloj mi vidis, krom Jakobo,
la frato de la Sinjoro. 20 Pri tio, kion mi skribas al vi,
jen, antaŭ Dio, mi ne mensogas. 21 Poste mi venis en
la regionojn de Sirio kaj Kilikio. 22 Kaj mi ankoraŭ
estis vizaĝe nekonata de la eklezioj de Judujo, kiuj
estis en Kristo; 23 sed ili nur aŭdis la jenon: Kiu nin
iam persekutis, tiu nun predikas la fidon, kiun iam li
atakis; 24 kaj ili gloris Dion en mi.

**2** Tiam, post intertempo de dek kvar jaroj, mi
denove supreniris al Jerusalem kun Barnabas,
kunkondukante ankaŭ Titon. 2 Kaj mi supreniris laŭ
Dia malkaŝo; kaj mi prezentis al ili la evangelion,
kiun mi predikas inter la nacianoj, sed aparte al la
eminentuloj, por ke mi ne estu vane kuranta, aŭ
kurinta. 3 Sed eĉ Titon, kiu estis kun mi, estante
Greko, oni ne devigis cirkumcidiĝi; 4 sed tio estis pro
la kaŝe enportitaj fratoj, kiuj ruze envenis, por spioni
nian liberecon en Kristo Jesuo, por ke ili nin sklavigu;
5 al kiuj ni ne submetiĝis cedeme, eĉ por unu horo;
por ke la vero de la evangelio restadu kun vi. 6 Sed el
tiuj, kiuj ŝajne iom valoris (kiaj ajn ili estis, tio por mi
ne estas grava: ĉe Dio ne estas personfavorado) — tiuj
valoruloj nenion aldonis al mi; 7 sed kontraŭe, kiam
ili vidis, ke je la evangelio de la necirkumcido mi estas
komisiita tiel same, kiel Petro je la evangelio de la
cirkumcido 8 (ĉar Tiu, kiu forte energiis en Petro por
la apostoleco de la cirkumcido, ankaŭ energiis en mi
por la nacianoj), 9 Jakobo kaj Kefas kaj Johano, kiuj
ŝajne estis kolonoj, rimarkinte la gracon donitan al
mi, donis al mi kaj al Barnabas la dekstrajn manojn
de kunuleco, por ke ni iru al la nacianoj, kaj ili al
la cirkumcidularo; 10 kondiĉe nur, ke ni memoru la
malriĉulojn, kion ja mi klopodis jam fari. 11 Sed kiam
venis Kefas al Antioĥia, mi lin rezistis vizaĝon kontraŭ
vizaĝo, ĉar li estis mallaŭdinda. 12 Ĉar antaŭ ol iuj
alvenis de Jakobo, li kunmanĝis kun la nacianoj; sed
kiam ili alvenis, li sin fortiris kaj apartigis, timante
tiujn, kiuj estis el la cirkumcido. 13 Kaj la aliaj Judoj
kune hipokritis, tiel ke eĉ Barnabas mem fortiriĝis per
ilia hipokriteco. 14 Kaj kiam mi vidis, ke ili ne prave
kondutas laŭ la vero de la evangelio, mi diris al Kefas
antaŭ ĉiuj: Se vi, estante Judo, naciane vivas, kaj ne
kiel Judoj, kial vi devigas la nacianojn agi laŭ Judismo?
15 Ni, nature Judoj, kaj ne pekuloj el la nacianoj, 16
sciante, ke praviĝas homo ne per faroj de la leĝo, sed
nur per fido al Jesuo Kristo, ni mem en Kristo Jesuo
kredis, por ke ni praviĝu per fido al Kristo, kaj ne
per faroj de la leĝo; tial, ke per faroj de la leĝo neniu
karno praviĝos. 17 Sed se, dezirante praviĝi en Kristo,
ni mem montriĝis pekuloj, ĉu Kristo estas servanto
de peko? Nepre ne! 18 Ĉar se mi rekonstruas tion,
kion mi detruis, mi montras min pekulo. 19 Ĉar per la
leĝo mi al la leĝo mortis, por ke mi al Dio vivu. 20
Kun Kristo mi krucumiĝis, tamen mi vivas; jam ne mi
mem, sed Kristo vivas en mi; kaj tiun vivon, kiun mi

vivas en karno, mi vivas en fido al la Filo de Dio, kiu
min amis kaj sin donis pro mi. 21 Mi ne vanigas la
gracon de Dio; ĉar se per la leĝo venas justeco, Kristo
ja vane mortis.

3 Ho malsaĝaj Galatoj, kiu vin ensorĉis? vin, antaŭ
kies okuloj Kristo Jesuo estis publike prezentita
krucumita. 2 Nur la jenon mi deziras sciiĝi de vi: Ĉu per
faroj de la leĝo vi ricevis la Spiriton, aŭ per la aŭdado
de fido? 3 Ĉu vi tiel malsaĝaj estas? komencinte en
Spirito, ĉu vi en karno nun perfektiĝas? 4 Ĉu vi vane
tiom suferis? se ja tio estas vana. 5 Ĉu do Tiu, kiu
donas al vi la Spiriton kaj faras ĉe vi miraklojn, tion
faras per faroj de la leĝo, aŭ per la aŭdado de fido? 6
Tiel same, kiel Abraham kredis al Dio, kaj tio estis
kalkulita al li kiel virto. 7 Sciu do, ke tiuj, kiuj rilatas al
fido, estas filoj de Abraham. 8 Antaŭvidante do, ke per
fido Dio pravigos la nacianojn, la Skribo antaŭpredikis
la evangelion al Abraham, dirante: Beniĝos per vi ĉiuj
gentoj. 9 Tial do tiuj, kiuj rilatas al fido, beniĝas kun
la fidela Abraham. 10 Ĉar ĉiuj, kiuj rilatas al faroj de la
leĝo, estas sub malbeno; ĉar estas skribite: Malbenita
estas ĉiu, kiu ne persistos en ĉio, kio estas skribita en
la libro de la leĝo, por plenumi ĝin. 11 Sed ke neniu
praviĝas antaŭ Dio per la leĝo, estas evidente; ĉar:
La virtulo vivos per fido; 12 kaj la leĝo ne rilatas
al fido; sed: Kiu plenumas ilin, tiu vivos en ili. 13
Kristo elaĉetis nin el la malbeno de la leĝo, fariĝinte
malbeno pro ni; ĉar estas skribite: Malbenita estas ĉiu,
kiu pendas sur lignaĵo; 14 por ke venu sur la nacianojn
la beno de Abraham en Kristo Jesuo; por ke per fido ni
ricevu la promeson de la Spirito. 15 Fratoj, mi parolas
laŭ homo: Konfirmitan interligon, eĉ nur homan,
neniu nuligas nek prialdonas. 16 Sed al Abraham kaj
al lia semo la promesoj estis parolitaj. Li ne diras: Kaj
al semoj, kvazaŭ pri multaj; sed kvazaŭ unu: Kaj al
via semo, kiu estas Kristo. 17 Sed jen kion mi diras:
Interligon, antaŭe konfirmitan de Dio, la leĝo, kiu
venis kvarcent tridek jarojn poste, ne nuligas, tiel ke
ĝi malefektivigus la promeson. 18 Ĉar se la heredaĵo
estas de la leĝo, ĝi jam ne estas de promeso; sed Dio
ĝin donis al Abraham per promeso. 19 Kio do estas
la leĝo? Ĝi estis aldonita kaŭze de eraroj, ĝis venos
la idaro, al kiu la promeso estas donita; ordigite per
anĝeloj en la mano de interulo. 20 Interulo ne estas de
unu, sed Dio estas unu. 21 Ĉu do la leĝo kontraŭstaras
al la promesoj de Dio? Nepre ne! ĉar se estus donita
leĝo, kiu povus vivigi, efektive justeco estus per la
leĝo. 22 Tamen la Skribo kune enŝlosis ĉion sub peko,
por ke la promeso per fido al Kristo Jesuo estu donata
al ĉiuj, kiuj fidas. 23 Sed antaŭ ol fido venis, ni estis
gardataj sub la leĝo, enŝlositaj por la fido malkaŝota.
24 Tial la leĝo fariĝis nia pedagogo, kondukanta al
Kristo, por ke ni praviĝu per fido. 25 Sed nun, post
kiam la fido alvenis, ni jam ne estas sub pedagogo. 26
Ĉar vi ĉiuj per la fido estas filoj de Dio en Kristo Jesuo.
27 Ĉar ĉiuj el vi, kiuj al Kristo baptiĝis, surmetis al si
Kriston. 28 Ne estas ja Judo nek Greko, ne estas sklavo
nek liberulo, ne estas ja vira kaj virina; ĉar vi ĉiuj estas
unu en Kristo Jesuo. 29 Se do vi apartenas al Kristo,
vere vi estas la idaro de Abraham, kaj heredantoj laŭ
la promeso.

4 Kaj mi sciigas vin, ke tiel longe, kiel la heredanto
estas infano, li neniel malsimilas sklavon, kvankam
li estas estro de ĉio; 2 sed li estas sub guvernantoj kaj
administrantoj, ĝis la templimo difinita de la patro. 3
Tiel ankaŭ ni, dum ni estis infanoj, estis en sklaveco
sub la elementoj de la mondo; 4 sed kiam venis la
pleneco de la tempo, Dio elsendis Sian Filon, el virino
naskitan, sub leĝo naskitan, 5 por reaĉeti tiujn, kiuj
estas sub la leĝo, por ke ni ricevu la filadopton. 6 Kaj
ĉar vi estas filoj, Dio elsendis la Spiriton de Sia Filo
en niajn korojn, kriantan, Aba, Patro! 7 Tiel ke ĉiu
el vi estas jam ne sklavo, sed filo; kaj se filo, ankaŭ
heredanto per Dio. 8 Tamen, tiam ne konante Dion,
vi estis en sklaveco al tiuj, kiuj nature ne estas dioj;
9 sed jam nun konante Dion, aŭ pli ĝuste, de Dio
konate, kial vi returniĝas al la malfortaj kaj mizeraj
elementoj, al kiuj vi deziras denove sklaviĝi? 10 Vi
observas tagojn kaj monatojn kaj tempojn kaj jarojn.
11 Mi timas pri vi, ke eble mi vane laboris ĉe vi. 12 Mi
petegas vin, fratoj, estu kiel mi, ĉar mi ankaŭ estas
kiel vi. Vi neniel al mi malbonfaris; 13 sed vi scias, ke
pro malforteco de la karno mi la unuan fojon predikis
al vi la evangelion; 14 kaj vian elprovon en mia karno
vi ne malestimis nek abomenis, sed kvazaŭ anĝelon
de Dio vi akceptis min, kvazaŭ Kriston Jesuon. 15 Kie
do estas via singratulado? mi atestas al vi, ke se estus
eble, vi estus elŝirintaj viajn okulojn kaj donintaj
ilin al mi. 16 Ĉu mi do per verdirado fariĝis al vi
malamiko? 17 Ili fervore serĉas vin, ne bone; ili eĉ
volas elŝlosi vin, por ke vi serĉu ilin. 18 Sed estas bone
esti fervore serĉata ĉiam en bona afero, kaj ne nur

tiam, kiam mi estas ĉe vi. 19 Miaj infanetoj, pro kiuj
mi denove suferas naskodoloron, ĝis Kristo formiĝos
en vi, 20 mi tute deziris esti ĉe vi nun, kaj ŝanĝi mian
voĉon; ĉar vere mi dubas pri vi. 21 Diru al mi, vi, kiuj
volas esti sub la leĝo, ĉu vi ne aŭskultas la leĝon? 22
Ĉar estas skribite, ke Abraham havis du filojn, unu el
la sklavino kaj unu el la liberulino. 23 Tamen tiu el la
sklavino naskiĝis laŭ la karno, sed ĉi tiu el la liberulino
naskiĝis per promeso. 24 Ĉi tio enhavas alegorion; ĉar
la du virinoj estas du interligoj, unu el la monto Sinaj,
por sklaveco naskante, kiu estas Hagar. 25 Ĉar tiu
Hagar estas la monto Sinaj en Arabujo, kaj prezentas
la nunan Jerusalemon, ĉar ŝi estas sklavigita kune
kun siaj infanoj. 26 Sed la supera Jerusalem estas
libera, kiu estas patrino nia. 27 Estas ja skribite: Ĝoju,
ho senfruktulino, kiu ne naskis, Sonigu kanton kaj
ĝojkriu, ho vi, kiu ne suferas naskodoloron; Ĉar la
forlasitino havos pli da infanoj, ol la havanta edzon.
28 Sed ni, fratoj, estas filoj de promeso tiel same, kiel
Isaak. 29 Sed kiel tiam la laŭ karno naskita persekutis
la laŭspiritulon, tiel estas ankaŭ nuntempe. 30 Sed
kion diras la Skribo? Forpelu la sklavinon kaj ŝian
filon; ĉar la filo de la sklavino ne heredos kun la filo
de la liberulino. 31 Tial, fratoj, ni estas filoj ne de
sklavino, sed de la liberulino.

**5** Por libereco Kristo nin liberigis; tial staru fortike,
kaj ne reimplikiĝu en jugon de sklaveco. 2 Jen mi,
Paŭlo, diras al vi, ke, se vi cirkumcidiĝos, Kristo al
vi tute ne utilos. 3 Mi denove atestas al ĉiu homo
cirkumcidata, ke li estas ŝuldanto, por plenumi la
tutan leĝon. 4 Vi, kiuj volas vin pravigi per la leĝo,
apartiĝis for de Kristo; vi forfalis de graco. 5 Ĉar
ni en la Spirito atendas la esperon de justeco per
la fido. 6 Ĉar en Kristo Jesuo nek cirkumcido nek
necirkumcido valoras ion, sed nur fido, energianta
per amo. 7 Vi bone kuradis; kiu vin malhelpis, ke vi
ne obeu la veron? 8 Ĉi tiu influo ne venas de tiu, kiu
vin vokas. 9 Malmulto da fermentaĵo fermentigas
la tutan mason. 10 Mi fidas pri vi en la Sinjoro, ke
vi ne alie sentados; sed tiu, kiu malkvietigas vin,
elportos sian propran juĝon, kiu ajn li estas. 11 Sed
mi, fratoj, se mi ankoraŭ predikas cirkumcidon, kial
mi estas ankoraŭ persekutata? tiuokaze la falpuŝilo de
la kruco estas formovita. 12 Mi volus, ke tiuj, kiuj vin
maltrankviligas, sin fortranĉu. 13 Ĉar vi, fratoj, estas
vokitaj al libereco; tamen ne uzu vian liberecon kiel
pretekston por la karno, sed per amo servu unu la
alian. 14 Ĉar la tuta leĝo estas plenumata en unu diro,
jene: Amu vian proksimulon kiel vin mem. 15 Sed se
vi mordas kaj manĝegas unu la alian, gardu vin, ke
vi ne estu detruitaj unu de la alia. 16 Sed mi diras:
Iradu laŭ la Spirito, kaj la deziregon de la karno vi ne
plenumos. 17 Ĉar la karno deziregas kontraŭ la Spirito,
kaj la Spirito kontraŭ la karno; ĉar ĉi ĉiuj interbatalas
reciproke, por ke vi ne faru tion, kion vi volas. 18
Sed se vi estas kondukataj de la Sinjoro, vi jam ne
estas sub la leĝo. 19 Evidentaj estas la faroj de la
karno, kiuj estas malĉasteco, malpureco, voluptemo,
20 idolkulto, sorĉado, malamikeco, malpaco, ĵaluzoj,
koleregoj, partiemeco, skismoj, herezoj, 21 envioj,
ebrieco, diboĉado, kaj aliaj similaj; pri kiuj mi avertas
vin, kiel mi jam antaŭe admonis vin, ke tiuj, kiuj
tion faradas, ne heredos la regnon de Dio. 22 Sed la
frukto de la Spirito estas amo, ĝojo, paco, pacienco,
komplezo, bonkoreco, fideleco, 23 mildeco, sinregado;
kontraŭ tiaj ne ekzistas leĝo. 24 Kaj tiuj, kiuj apartenas
al Kristo Jesuo, jam krucumis la karnon kun ĝiaj pasioj
kaj voluptoj. 25 Se ni vivas per la Spirito, en la Spirito
ni ankaŭ iradu. 26 Ni ne fariĝu fanfaronemaj, incitante
kaj enviante unu la alian.

**6** Fratoj, eĉ se homo estos trovita en ia kulpo, vi, kiuj
estas spiritaj, restarigu tiun per spirito de mildeco;
rigardante vin, ĉiu sin mem, por ke vi ne estu tentataj.
2 Reciproke subtenadu viajn ŝarĝojn, kaj tiamaniere
plenumu la leĝon de Kristo. 3 Ĉar, se iu, estante nenio,
sin estimas, kvazaŭ li estas io, li sin trompas. 4 Sed
ĉiu kontrolu sian propran faradon, kaj tiam li havos
singratuladon pri si mem, kaj ne pri sia proksimulo. 5
Ĉar ĉiu devas subteni sian propran portaĵon. 6 Tiu, kiu
estas instruata en la parolo de Dio, partoprenu kun
tiu, kiu lin instruas, en ĉiuj bonaĵoj. 7 Ne trompiĝu; Dio
ne estas mokata; ĉar ĉion, kion oni semas, tion ankaŭ
li rikoltos. 8 Ĉar kiu semas por sia karno, el la karno
tiu rikoltos putradon; sed kiu semas por la Spirito, el
la Spirito tiu rikoltos eternan vivon. (aiōnios g166) 9 Kaj
ni ne laciĝu en bonfarado; ĉar ĝustatempe ni rikoltos,
se ni ne senfortiĝos. 10 Tial laŭ nia oportuna tempo ni
bonfaradu al ĉiuj, precipe al tiuj, kiuj apartenas al la
familio de la fido. 11 Vidu, per kiaj grandaj literoj mi
skribis al vi propramane. 12 Kiuj deziras sin paradi
per la karno, tiuj devigas vin cirkumcidiĝi; sole por ke
ili ne estu persekutataj pro la kruco de Kristo. 13 Ĉar

eĉ tiuj mem, kiuj cirkumcidiĝas, ne observas la leĝon;
sed ili deziras, ke vi cirkumcidiĝu, por ke ili fanfaronu
pri via karno. 14 Sed por mi ne estu fanfarono krom
pri la kruco de nia Sinjoro Jesuo Kristo, per kiu la
mondo estas krucumita al mi, kaj mi al la mondo. 15
Ĉar nek cirkumcido nek necirkumcido estas io, sed
nova kreitaĵo. 16 Kaj kiuj irados laŭ tiu regulo, paco
kaj kompato estu sur ili ĉiuj, kaj sur la Izrael de Dio.
17 De nun neniu min ĝenu, ĉar mi portas en mia korpo
la signojn de Jesuo. 18 La graco de nia Sinjoro Jesuo
Kristo estu kun via spirito, fratoj. Amen.

# Efesanoj

1 Paŭlo, apostolo de Jesuo Kristo per la volo de Dio,
al la sanktuloj, kiuj estas en Efeso, kaj al la fideluloj
en Kristo Jesuo: 2 Graco estu al vi kaj paco de Dio, nia
Patro, kaj de la Sinjoro Jesuo Kristo. 3 Benata estu la
Dio kaj Patro de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu benis
nin per ĉia beno spirita en la ĉielejoj en Kristo; 4
kiel Li elektis nin en li antaŭ la fondo de la mondo,
por ke ni estu sanktaj kaj senmakulaj antaŭ Li en
amo; 5 antaŭdestininte nin por filadopto per Jesuo
Kristo al Si mem, laŭ la aprobo de Sia volo, 6 al la
laŭdo de la gloro de Lia graco, per kiu Li favoris
nin en la Amata; 7 en kiu ni havas la elaĉeton per
lia sango, la pardonon de niaj pekoj, laŭ la riĉo de
lia graco, 8 kiun li abundigis al ni en ĉia saĝeco kaj
prudento, 9 sciiginte al ni la misteron de Lia volo, laŭ
Lia bonvolo, kiun Li antaŭdecidis en li, 10 por dispono
en la pleneco de la tempo, por sumigi en Kristo ĉion,
kio estas en la ĉieloj kaj sur la tero; 11 en li, en kiu
ni fariĝis heredaĵo, destinite laŭ la antaŭdecido de
Tiu, kiu ĉion faras laŭ la intenco de Sia volo; 12 por
ke ni estu por la laŭdo de Lia gloro, ni, kiuj antaŭe
esperis en Kristo; 13 en kiu vi ankaŭ esperas, aŭdinte
la vorton de la vero, la evangelion de via savo; al
kiu ankaŭ kredinte, vi estas sigelitaj per la Sankta
Spirito de promeso, 14 kiu estas antaŭgarantiaĵo de
nia heredaĵo, por la elaĉeto de la posedaĵo, por laŭdo
de Lia gloro. 15 Pro tio mi ankaŭ, aŭdinte pri via fido
al la Sinjoro Jesuo, kaj via amo al ĉiuj sanktuloj, 16 ne
ĉesas danki pro vi, vin nomante en miaj preĝoj; 17
por ke la Dio de nia Sinjoro Jesuo Kristo, la Patro de
gloro, donu al vi spiriton de saĝeco kaj malkaŝo en
la konado de Li; 18 dum la okuloj de via koro estas
lumigataj, por ke vi sciu, kia estas la espero de Lia
voko, kaj kia la riĉeco de la gloro de Lia heredaĵo en la
sanktuloj, 19 kaj kia la supermezura grandeco de Lia
potenco al ni, kiuj kredas, laŭ la energio de la efikeco
de Lia forto, 20 kiun Li faris en Kristo, relevante lin
el la mortintoj, kaj sidigante lin dekstre de Li en la
ĉieloj, 21 multe super ĉiu reganto kaj aŭtoritato kaj
potenco kaj regeco, kaj ĉiu nomo nomata, ne nur en
ĉi tiu mondo, sed ankaŭ en la estonta; (aiōn g165) 22
kaj ĉion Li metis sub liajn piedojn, kaj donis lin kiel
kapon super ĉio por la eklezio, 23 kiu estas lia korpo,
la pleneco de Tiu, kiu plenigas ĉion en ĉio.

2 Kaj vin li vivigis, kiam vi estis malvivaj per eraroj
kaj pekoj, 2 en kiuj vi iam iradis laŭ la vojo de ĉi tiu
mondo, laŭ la estro de la potenco de la aero, de la
spirito, kiu nun energias en la filoj de malobeo; (aiōn
g165) 3 inter kiuj ni ĉiuj iam ankaŭ vivis, plenumante
la dezirojn de nia karno, farante la volojn de la karno
kaj de la menso, kaj ni estis laŭ naturo infanoj de
kolerego, kiel ankaŭ la aliaj. 4 Sed Dio, estante riĉa en
kompateco, pro Sia granda amo, per kiu Li amis nin, 5
eĉ kiam ni estis malvivaj en niaj eraroj, nin vivigis en
Kristo (per graco vi saviĝis), 6 kaj nin levis, kaj nin
kunsidigis en la ĉielejoj en Kristo Jesuo; 7 por montri
en la mondaĝoj estontaj la superabundan riĉecon
de Sia graco en korfavoro al ni en Kristo Jesuo: (aiōn
g165) 8 ĉar per graco vi saviĝis per fido; ne per vi
mem: ĝi estas dono de Dio; 9 ne el faroj, por ke neniu
fanfaronu. 10 Ĉar ni estas Lia faritaĵo, kreitaj en Kristo
Jesuo por bonaj faroj, kiujn antaŭaranĝis Dio, por
ke ni iradu en ili. 11 Kaj pro tio rememoru, ke iam
vi, nacianoj laŭ la karno, nomataj la Necirkumcido
ĉe la tiel nomata Cirkumcido, mane farita sur la
karno — 12 ke vi estis tiam sen Kristo, fremdigitaj
for de la komunumo de Izrael, kaj eksteruloj de la
interligoj de la promeso, esperon ne havantaj kaj sen
Dio en la mondo. 13 Sed nun en Kristo Jesuo vi, iam
malproksimaj, proksimiĝis en la sango de Kristo. 14
Ĉar nia paco estas li, kiu unuigis ambaŭ kaj rompis la
intermuron de disigo, 15 en sia karno neniiginte la
malamon, la leĝon de ordonoj en dekretoj; por krei
en si el la du unu novan homon, tiel farante pacon;
16 kaj por kunakordigi ambaŭ en unu korpo al Dio
per la kruco, mortiginte per tio la malamon; 17 kaj
li venis kaj predikis pacon al vi malproksimaj kaj al
la proksimaj; 18 ĉar per li ni ambaŭ havas en unu
Spirito alkondukon al la Patro. 19 Sekve vi jam estas
ne fremduloj kaj pasloĝantoj, sed samregnanoj kun la
sanktuloj, kaj el la domanaro de Dio, 20 konstruitaj
sur la fundamento de la apostoloj kaj profetoj, kies
bazangula ŝtono estas Kristo Jesuo mem; 21 en kiu
ĉiu aparta konstruaĵo, bone kunigita, kreske fariĝas
sankta templo en Kristo; 22 en kiu vi ankaŭ estas
kunkonstruitaj por sanktejo de Dio en la Spirito.

3 Pro tio mi, Paŭlo, malliberulo de Kristo Jesuo por
vi nacianoj, 2 se vi aŭdis pri la dispono de tiu graco
de Dio, kiu estas donita al mi por vi, 3 ke per malkaŝo
la mistero estas sciigita al mi, kiel mi jam antaŭe

mallonge skribis, 4 per kio vi povas rimarki, dum vi
legas, mian komprenon en la mistero de Kristo, 5 kiu
en aliaj generacioj ne estis sciigita al la homidoj, kiel
ĝi nun malkaŝiĝis al liaj sanktaj apostoloj kaj profetoj
en la Spirito, 6 ke la nacianoj estas kunheredantoj,
kaj samkorpanoj, kaj partoprenantoj en la promeso
en Kristo Jesuo per la evangelio, 7 al kiu mi fariĝis
servanto laŭ la dono de la graco de Dio, donita al
mi laŭ la energio de Lia potenco. 8 Al mi, kiu estas
malpli ol la malplej granda el ĉiuj sanktuloj, ĉi tiu
graco estas donita, por ke mi prediku inter la nacioj la
neesploreblan riĉon de Kristo; 9 kaj por ke mi klarigu
al ĉiuj, kia estas la dispono de la mistero kaŝita tra
ĉiuj mondaĝoj en Dio, kiu kreis ĉion; (aiōn g165) 10 por
ke nun konatiĝu al la regantoj kaj aŭtoritatoj en la
ĉielejoj, per la eklezio, la multobla saĝeco de Dio, 11
laŭ la eterna decido, kiun Li faris en Kristo Jesuo,
nia Sinjoro; (aiōn g165) 12 en kiu ni havas kuraĝon kaj
alkondukon en fidado per nia fido al li. 13 Pro tio mi
petas, ke vi ne senfortiĝu pro miaj suferoj por vi, kiuj
estas via gloro. 14 Pro tio mi fleksas miajn genuojn
antaŭ la Patro, 15 el kiu ĉiu familio, en la ĉielo kaj sur
la tero, estas nomata, 16 por ke Li donu al vi, laŭ la
riĉo de Sia gloro, ke vi estu potence fortigitaj en la
interna homo, per Lia Spirito; 17 por ke Kristo loĝu
per fido en viaj koroj; tiel, ke vi, enradikigite kaj bazite
en amo, 18 kapabliĝu kun ĉiuj sanktuloj kompreni, kio
estas la larĝeco kaj longeco kaj alteco kaj profundeco,
19 kaj scii la amon de Kristo, kiu superas scion, por ke
vi pleniĝu eĉ ĝis la pleneco de Dio. 20 Nun al Tiu, kiu
povas tre abunde fari, super ĉio, kion ni povas peti aŭ
pensi, laŭ la potenco, kiu energias en ni, 21 estu gloro
en la eklezio kaj en Kristo Jesuo ĝis ĉiuj generacioj
por ĉiam kaj eterne. Amen. (aiōn g165)

4 Mi do, malliberulo pro la Sinjoro, petegas vin, ke
vi iradu inde je la voko, en kiu vi estas vokitaj,
2 kun ĉia humileco kaj mildeco, kun toleremeco,
paciencante unu al alia en amo, 3 penante konservi
la unuecon de la Spirito en la ligilo de paco. 4 Estas
unu korpo, kaj unu Spirito, kiel ankaŭ vi estas vokitaj
en unu espero de via voko; 5 unu Sinjoro, unu fido,
unu bapto, 6 unu Dio kaj Patro de ĉiuj, kiu estas
super ĉiuj, kaj tra ĉiuj, kaj en ĉiuj. 7 Sed al ĉiu el
ni la graco estas donita, laŭ la mezuro de la dono
de Kristo. 8 Tial li diras: Kiam li supreniris alten, li
alkondukis kaptitojn, Kaj donis donacojn al homoj. 9
(Ĉi tio do: Li supreniris — kio ĝi estas krom tio, ke
li ankaŭ antaŭe malsupreniris ĝis la profundaĵoj de
la tero? 10 La malsuprenirinto — tiu sama estis la
suprenirinto alte super ĉiuj ĉieloj, por plenigi ĉion.)
11 Kaj unujn li donis por esti apostoloj; aliajn, profetoj;
aliajn, evangeliistoj; kaj aliajn, paŝtistoj kaj instruistoj;
12 por perfektigo de la sanktuloj, por la laboro de
pastrado, por la konstruo de la korpo de Kristo, 13 ĝis
ni ĉiuj atingos la unuecon de la fido kaj de la scio de
la Filo de Dio, ĝis la homo perfekta, ĝis la mezuro de
la matureco de la pleneco de Kristo; 14 por ke ni jam
ne estu infanoj, onde ĵetataj kaj ĉirkaŭpelataj de ĉiu
vento de doktrino, per ĵonglado de homoj, per ruzo
laŭ artifiko de trompo; 15 sed parolante la veron en
amo, ni ĉiel kreskadu en tiun, kiu estas la kapo, Kristo,
16 el kiu la tuta korpo, kunigita kaj kunfortikigita tra
ĉiu artiko de la livera sistemo, per energio, laŭ la
mezuro de ĉiu parto, faras kreskadon de la korpo,
por la sinedifado en amo. 17 La jenon do mi diras, kaj
protestas en la Sinjoro, ke vi ne plu iru tiel, kiel iras
ankaŭ la nacianoj en la vanteco de siaj mensoj, 18
mallumigitaj en intelekto, fremdigitaj for de la vivo
de Dio, pro la nescio, kiu estas en ili, pro la malmoleco
de ilia koro; 19 kiuj, sensentiĝinte, fordonis sin al
malĉasteco por la praktikado de ĉia malpureco kun
avideco. 20 Sed vi ne tiel lernis Kriston; 21 se almenaŭ
vi lin aŭdis, kaj en li estis instruitaj, kiel en Jesuo estas
vero; 22 por ke vi formetu, rilate al antaŭa konduto, la
malnovan homon, pereeman laŭ trompaj deziroj, 23
kaj renoviĝu rilate al la spirito de via menso, 24 kaj
surmetu la novan homon, kreitan laŭ Dio en justeco
kaj vera sankteco. 25 Pro tio, formetante malveron,
ĉiu parolu veron kun sia proksimulo, ĉar ni estas
membroj unu de alia. 26 Koleru kaj ne peku, la suno
ne subiru sur via kolero; 27 ankaŭ ne donu lokon
al la diablo. 28 Ŝtelinto ne plu ŝtelu, sed prefere li
laboru, farante bonon per siaj manoj, por ke li havu
ion por doni al bezonanto. 29 El via buŝo eliru neniu
putra vorto, sed nur tio, kio estas bona, por konvena
edifado, por ke ĝi donu gracon al la aŭdantoj. 30 Kaj
ne ĉagrenu la Sanktan Spiriton de Dio, en kiu vi estis
sigelitaj al la tago de elaĉeto. 31 Ĉia akreco kaj indigno
kaj kolero kaj voĉbruado kaj kalumnio estu formetitaj
el inter vi, kune kun ĉia malico; 32 kaj estu bonfaraj
unu al alia, bonkoraj, pardonantaj unu al alia, kiel
ankaŭ Dio en Kristo pardonis al vi.

**5** Estu do imitantoj de Dio, kiel infanoj amataj; **2** kaj
iradu en amo, kiel Kristo nin amis kaj sin donis pro
ni, donaĵon kaj oferaĵon al Dio por agrabla odoraĵo. **3**
Sed malĉasteco kaj ĉia malpureco kaj avideco ne eĉ
estu nomataj inter vi, kiel decas por sanktuloj; **4** nek
ia hontindaĵo, nek sensenca parolado, nek tro libera
babilado, kiuj ne konvenas; sed prefere dankesprimo.
**5** Ĉar vi ja scias, ke ĉiu malĉastulo kaj malpurulo kaj
avidulo, kiu estas idolano, havas nenian heredon en la
regno de Kristo kaj Dio. **6** Neniu vin trompu per vantaj
vortoj; ĉar pro tiuj aferoj venas sur la infanojn de
malobeo la kolero de Dio. **7** Ne estu do partoprenantoj
kun ili; **8** ĉar iam vi estis mallumo, sed jam vi estas
lumo en la Sinjoro; iru kiel infanoj de lumo **9** (ĉar la
frukto de la lumo estas en ĉia boneco kaj justeco kaj
vero), **10** provante, kio bone plaĉas al la Sinjoro; **11** kaj
ne partoprenu kun la senfruktaj faroj de mallumo, sed
prefere refutu ilin; **12** ĉar estas hontinde eĉ paroli pri
tio, kion ili faras sekrete. **13** Sed ĉio, kio estas refutata,
estas elmontrata per la lumo, ĉar ĉio elmontrata
estas lumo. **14** Tial estas dirite: Vekiĝu, dormanto,
kaj releviĝu el la mortintoj, kaj Kristo al vi lumos. **15**
Zorgu do, ke vi atente iradu, ne kiel malsaĝaj, sed kiel
saĝaj; **16** elaĉetante la tempon, ĉar malbonaj estas
la tagoj. **17** Ne estu do senprudentaj, sed komprenu,
kio estas la volo de la Sinjoro. **18** Kaj ne ebriiĝu per
vino, en kio estas diboĉo, sed pleniĝu per la Spirito;
**19** parolante unu al alia per psalmoj kaj himnoj kaj
kantoj spiritaj, kantante kaj psalmante en viaj koroj al
la Sinjoro, **20** dankante Dion, la Patron, ĉiam pro ĉio en
la nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo; **21** submetiĝante
unu al alia en la timo al Kristo. **22** Edzinoj, submetiĝu
al viaj edzoj tiel same, kiel al la Sinjoro. **23** Ĉar edzo
estas kapo de edzino, kiel ankaŭ Kristo estas kapo
de la eklezio; kaj li estas la savanto de la korpo. **24**
Sed kiel la eklezio sin submetas al Kristo, tiel ankaŭ
edzinoj al edzoj en ĉio. **25** Edzoj, amu viajn edzinojn,
kiel Kristo amis la eklezion kaj pro ĝi sin donis, **26** por
ke li sanktigu ĝin per akvolavo, kun la vorto, **27** por
ke li starigu ĝin antaŭ si glora eklezio, ne havanta
makulon, nek malglataĵon, nek ion tian, sed por ke ĝi
estu sankta kaj sendifekta. **28** Tiel same devas edzoj
ami siajn edzinojn kiel siajn proprajn korpojn. Kiu
amas sian edzinon, tiu amas sin mem; **29** ĉar oni
neniam malamas sian propran karnon, sed nutras kaj
prizorgas ĝin, kiel ankaŭ la Sinjoro la eklezion; **30** ĉar
ni estas membroj de lia korpo. **31** Tial viro forlasos
sian patron kaj sian patrinon, kaj aliĝos al sia edzino,
kaj ili du estos unu karno. **32** Ĉi tiu mistero estas
granda, sed mi parolas pri Kristo kaj la eklezio. **33**
Tamen ankaŭ ĉiu el vi individue amu sian edzinon,
kiel sin mem; kaj la edzino timu sian edzon.

**6** Infanoj, obeu al viaj gepatroj en la Sinjoro, ĉar tio
decas. **2** Respektu vian patron kaj vian patrinon (ĝi
estas la unua ordono kun promeso), **3** por ke estu al
vi bone kaj por ke longe daŭru via vivo sur la tero. **4**
Kaj patroj, ne kolerigu viajn infanojn; sed nutradu ilin
en la disciplino kaj admono de la Sinjoro. **5** Sklavoj,
obeu al tiuj, kiuj laŭ la karno estas viaj sinjoroj, kun
timo kaj tremo, en simpleco de via koro, kiel al Kristo;
**6** ne laŭ okulservo, kiel homplaĉantoj, sed kiel sklavoj
de Kristo, plenumante el la koro la volon de Dio; **7**
kun bonvoleco servante, kiel al la Sinjoro, kaj ne al
homoj; **8** sciante, ke, kian ajn bonon faras ĉiu, ĉu
sklavo aŭ liberulo, tion saman li ricevos de la Sinjoro.
**9** Kaj sinjoroj, agu tiel same al ili, forlasante minacon;
sciante, ke via kaj ilia Sinjoro estas en la ĉielo, kaj ne
ekzistas ĉe li personfavorado. **10** Cetere, fortiĝu en la
Sinjoro kaj en la forteco de lia potenco. **11** Surmetu la
tutan armilaron de Dio, por ke vi povu kontraŭstari
al la artifikoj de la diablo. **12** Ĉar nia luktado estas
ne kontraŭ sango kaj karno, sed kontraŭ regantoj,
kontraŭ aŭtoritatoj, kontraŭ mondpotenculoj de la
nuna mallumo, kontraŭ la spiritaroj de malbono en la
ĉielejoj. **(aiōn g165)** **13** Tial prenu al vi la tutan armilaron
de Dio, por ke vi povu rezisti en la malbona tago,
kaj, farinte ĉion, stari. **14** Staru do, ĉirkaŭzoninte
la lumbojn per vero, kaj surmetinte la kirason de
justeco, **15** kaj enŝuiginte la piedojn per la pretiĝo de
la evangelio de paco; **16** super ĉio tenante la ŝildon de
fido, per kiu vi povos estingi ĉiujn fajrajn sagojn de
la malbonulo. **17** Kaj ricevu la kaskon de savo, kaj la
glavon de la Spirito, kiu estas la vorto de Dio; **18** per
ĉia preĝado kaj petegado en ĉiu tempo preĝante en
la Spirito, kaj viglante por tio en ĉia persisteco kaj
petego por ĉiuj sanktuloj, **19** kaj por mi, ke al mi estu
donita parolpovo kun malfermo de mia buŝo, por ke
mi sciigu kuraĝe la misteron de la evangelio, **20** pro
kiu mi estas ambasadoro en kateno, por ke mi parolu
kuraĝe en ĝi, kiel mi devus paroli. **21** Plue, por ke vi
sciiĝu pri miaj aferoj, kiel mi statas, raportos ĉion al vi
Tiĥiko, la amata frato kaj fidela diakono en la Sinjoro,
**22** kiun mi sendis al vi ĝuste por tio, ke vi sciiĝu pri

nia stato kaj por ke li konsolu viajn korojn. **23** Paco
estu al la fratoj, kaj amo kun fido de Dio, la Patro, kaj
de la Sinjoro Jesuo Kristo. **24** Graco estu kun ĉiuj, kiuj
sendekliniĝe amas nian Sinjoron Jesuo Kristo.

# Filipianoj

**1** Paŭlo kaj Timoteo, servistoj de Jesuo Kristo, al ĉiuj
sanktuloj en Kristo Jesuo, kiuj estas en Filipi, kun
la episkopoj kaj diakonoj: **2** Graco al vi kaj paco estu
de Dio, nia Patro, kaj de la Sinjoro Jesuo Kristo. **3** Mi
dankas mian Dion ĉe ĉiu rememoro pri vi, **4** ĉiam
en ĉiu mia preĝo por vi ĉiuj farante la peton kun
ĝojo, **5** pro via partopreno en la evangelio de post la
unua tago ĝis nun; **6** pri tio mem fidante, ke Tiu, kiu
komencis bonan faron ĉe vi, ĝin perfektigados ĝis la
tago de Jesuo Kristo; **7** kaj ja decas, ke mi tion sentu
pri vi ĉiuj, ĉar vi havas min en via koro, kaj vi ĉiuj
estas kun mi partoprenantoj en la graco, kiel en miaj
katenoj, tiel ankaŭ en la defendo kaj fortigado de la
evangelio. **8** Ĉar Dio estas mia atestanto, kiel fervore
mi sopiras al vi ĉiuj laŭ la koramo de Kristo Jesuo. **9**
Kaj mi preĝas, ke via amo abundu ankoraŭ plie kaj
plie, en scio kaj ĉia saĝo, **10** por ke vi aprobu la plej
bonajn aferojn kaj estu sinceraj kaj senofendaj ĝis la
tago de Kristo, **11** plenigite de la fruktoj de justeco,
kiuj estas per Jesuo Kristo, al la gloro kaj laŭdo de
Dio. **12** Sed, fratoj, mi volas certigi vin, ke miaj aferoj
plie efektiviĝis por la progresado de la evangelio,
**13** tiel, ke miaj katenoj estas evidentigitaj en Kristo
tra la tuta Pretorio kaj ĉie aliloke; **14** kaj la plimulto
el la fratoj en la Sinjoro, pro miaj katenoj fariĝinte
sentimaj, supermezure kuraĝas persiste elparoladi la
vorton de Dio. **15** Unuj ja proklamas Kriston eĉ envie
kaj malpace, sed aliaj bonvole; **16** ĉi tiuj kun amo,
sciante, ke mi estas metita, por defendi la evangelion;
**17** sed tiuj kun partieco predikas Kriston, ne sincere,
supozante, ke ili aldonos doloron al miaj katenoj. **18**
Kio do? nur tio, ke ĉiamaniere, ĉu pretekste aŭ vere,
oni predikas Kriston: kaj pro tio mi ĝojas kaj ankoraŭ
plu ĝojos. **19** Ĉar mi scias, ke ĉi tio efikos al mia savo,
per viaj preĝoj kaj la provizado de la Spirito de Jesuo
Kristo, **20** laŭ mia fervora atendado kaj espero, ke
mi pri nenio hontiĝos, sed ke per ĉia liberparolo,
kiel ĉiam, tiel ankaŭ nun, Kristo estos glorata en mia
korpo, ĉu per vivo aŭ per morto. **21** Ĉar ĉe mi la
vivado estas Kristo, kaj morti estas gajno. **22** Sed se mi
vivados korpe, tio signifas pluan frukton de laboro;
kaj mi ne scias, kion elekti. **23** Ĉar ambaŭflanke mi
estas embarasata, havante deziron foriri kaj esti kun
Kristo, kio estas multe pli bona; **24** tamen mia restado
en la karno estas pli bezona por vi. **25** Kaj tiel fidante,
mi scias, ke mi restos kaj apudrestados kun vi ĉiuj, por
via progreso kaj ĝojo de fido; **26** por ke mi pli abunde
en Kristo Jesuo gratulu min pri vi, per mia denova
ĉeestado kun vi. **27** Sed via vivmaniero nur estu inda
je la evangelio de Kristo, por ke, ĉu mi alvenos kaj
vin vidos, aŭ forestos, mi aŭdu pri viaj aferoj, ke vi
fortike staras unuspirite, kunbatalantaj unuanime por
la fido de la evangelio, **28** kaj neniel timigitaj de la
kontraŭuloj: kio estas al ili certa signo de pereo, sed
al vi certa signo (nepre de Dio) pri via saviĝo; **29** ĉar
estas al vi permesite pro Kristo, ne sole kredi al li, sed
ankaŭ suferi pro li; **30** havantaj la saman bataladon,
kiun vi vidis ĉe mi, kaj pri kiu vi nun aŭdas, ke ĉe mi
ĝi ankoraŭ ekzistas.

**2** Se do en Kristo ekzistas ia konsolo, ia simpatio
de amo, ia kunuleco de la Spirito, ia korfavoro
kaj kompato, **2** plenigu mian ĝojon, ke vi tiel same
sentu, havante la saman amon, estante unuanimaj,
sampensaj, **3** nenion farante malpace aŭ arogante, sed
kun humileco rigardante unu la alian kiel pli indan, ol
li mem; **4** ne atentu ĉiu siajn proprajn aferojn, sed ĉiu
ankaŭ la aferojn de aliaj. **5** Tiu sama spirito estu en vi,
kiu estis ankaŭ en Kristo Jesuo, **6** kiu, estante en la
formo de Dio, ne rigardis kiel ŝatindaĵon la egalecon
kun Dio **7** sed sin malplenigis, alprenante la formon de
sklavo, fariĝante laŭ la bildo de homoj; **8** kaj troviĝinte
laŭfigure kiel homo, li sin humiligis kaj fariĝis obeema
ĝis morto, eĉ ĝis la morto per kruco. **9** Pro tio do Dio
tre alte superigis lin, kaj donis al li nomon, kiu estas
super ĉia nomo, **10** por ke en la nomo de Jesuo kliniĝu
ĉiu genuo, de enĉieluloj kaj surteruloj kaj subteruloj,
**11** kaj ĉiu lango konfesu, ke Jesuo Kristo estas Sinjoro,
al la gloro de Dio, la Patro. **12** Tial, miaj amatoj, kiel vi
ĉiam obeis, ne nur dum mia ĉeestado ĉe vi, sed nun
eĉ pli multe dum mia forestado, ellaboru kun timo kaj
tremo vian propran savon; **13** ĉar Dio estas Tiu, kiu
elfaras en vi la volon kaj la energion laŭ Sia bonvolo.
**14** Ĉion faru sen murmuroj kaj disputoj, **15** por ke vi
estu senkulpaj kaj simplaj, filoj de Dio, neriproĉindaj,
meze de perversa kaj malhonesta generacio, inter kiuj
vi brilas kiel lumiloj en la mondo, **16** forte tenante la
vorton de la vivo; por ke estu por mi io, pri kio mi
povos min gratuli en la tago de Kristo, ke mi ne vane
kuris kaj laboris. **17** Cetere, eĉ se mi estas elverŝata
sur la oferon kaj servon de via fido, mi ĝojas kaj
kunĝojas kun vi ĉiuj; **18** kaj tiel same vi ankaŭ ĝoju

kaj kunĝoju kun mi. 19 Sed mi esperas en la Sinjoro
Jesuo baldaŭ sendi al vi Timoteon, por ke mi ankaŭ
refreŝiĝu, kiam mi certiĝos pri via stato. 20 Ĉar mi
havas neniun samsentan, kiu sincere zorgos pri via
stato. 21 Ĉar ĉiu celas siajn aferojn, ne la aferojn de
Jesuo Kristo. 22 Sed vi ja konas lian provadon, ke kiel
filo servas al sia patro, tiel li servis kun mi por la
evangelio. 23 Lin do mi esperas tuj sendi, kiam mi
certiĝos, kio al mi okazos, 24 sed mi fidas al la Sinjoro,
ke mi mem ankaŭ venos baldaŭ. 25 Tamen ŝajnis al
mi necese sendi al vi Epafrodimon, mian fraton kaj
kunlaboranton kaj kunbatalanton, vian senditon kaj
helpanton por mia bezono; 26 ĉar li sopiris al vi ĉiuj,
kaj forte maltrankviliĝis pro tio, ke vi jam sciiĝis pri
lia malsano; 27 ĉar efektive li malsanis, preskaŭ ĝis
morto; sed Dio kompatis lin, kaj ne sole lin, sed ankaŭ
min, por ke mi ne havu malĝojon super malĝojo. 28 Mi
do sendis lin des pli diligente, por ke, revidante lin, vi
ĝoju, kaj ke mi estu sen malĝojo. 29 Akceptu lin do en
la Sinjoro kun plena ĝojo, kaj tiajn homojn honoru; 30
ĉar pro la laboro por Kristo li alproksimiĝis al morto,
riskante sian vivon, por kompletigi tion, kio mankis
ĉe via servado al mi.

3 Fine, fratoj, ĝoju en la Sinjoro. Tute ne ĝenas min
al vi skribi ripete, kaj por vi tio estas sendanĝeriga.
2 Gardu vin kontraŭ la hundoj, gardu vin kontraŭ la
malbonaguloj, gardu vin kontraŭ la karntranĉuloj; 3
ĉar ni estas la cirkumciduloj, kiuj per la Spirito de Dio
adoras, kaj nin gratulas pri Kristo Jesuo, kaj ne havas
fidon al la karno; 4 kvankam mi mem povas havi
fidon al la karno; se iu alia pretendas fidi la karnon,
mi ja pli efektive; 5 cirkumcidita la okan tagon, el
la raso Izraela, el la tribo de Benjamen, Hebreo el
Hebreoj; rilate la leĝon, Fariseo; 6 rilate fervoron,
persekutanto de la eklezio; rilate la justecon, kiu
fariĝas per la leĝo, senkulpa. 7 Sed kio estis al mi
gajno, tion mi rigardis kiel malgajnon pro Kristo. 8
Kaj efektive mi rigardas ĉion kiel malgajnon pro la
supereco de la scio de Kristo Jesuo, mia Sinjoro, pro
kiu mi suferis malgajnon de ĉio, kaj rigardas ĉion kiel
rubon, por ke mi gajnu Kriston, 9 kaj estu trovata
en li, ne havante mian justecon, kiu devenas de la
leĝo, sed la justecon, kiu estas per la fido al Kristo,
la justecon, kiu devenas de Dio sur fidon; 10 por
ke mi sciu lin kaj la potencon de lia releviĝo kaj la
kunulecon en liaj suferoj, konformiĝinte al lia morto,
11 se mi povos iel atingi la releviĝon el la mortintoj. 12
Ne kvazaŭ mi jam trafis, aŭ jam perfektiĝis; sed mi
min pelas antaŭen, se mi nur povos ekteni tion, pro
kio mi estas tenata de Kristo Jesuo. 13 Miaj fratoj, mi
ne rigardas min kiel jam ektenantan; sed nur jene:
forgesante tion, kio estas malantaŭe, kaj strebante al
tio, kio estas antaŭe, 14 mi min pelas al la celo, por
akiri la premion de la supera voko de Dio en Kristo
Jesuo. 15 Ĉiuj el ni do, kiuj estas perfektaj, tiel pensu;
kaj se pri io vi pensas alie, tion ankaŭ Dio malkaŝos al
vi; 16 sed ĉiaokaze, laŭ tio, kiom ni jam atingis, ni
iradu. 17 Fratoj, estu kunimitantoj de mi; kaj observu
tiujn, kiuj tiel iradas, kiel vi havas nin kiel ekzemplon.
18 Ĉar iradas multaj, pri kiuj mi ofte diris al vi, kaj nun
eĉ plorante diras, ke ili estas malamikoj de la kruco de
Kristo; 19 ilia fino estas pereo, ilia dio estas la ventro,
kaj ilia gloro estas en ilia honto, ili atentas surteraĵojn.
20 Ĉar nia burĝrajto estas en la ĉielo, de kie ankaŭ
ni atendas Savonton, la Sinjoron Jesuo Kristo, 21 kiu
denove elformos la korpon de nia humiliĝo, por ke ĝi
konformiĝu al la korpo de lia gloro, laŭ la energio,
per kiu li eĉ povas ĉion al si submeti.

4 Tial, miaj fratoj amataj kaj alsopirataj, mia ĝojo
kaj mia krono, tiel staru fortike en la Sinjoro,
miaj amataj. 2 Mi admonas Eŭodian, kaj mi admonas
Sintiĥen, ke ili estu unuanimaj en la Sinjoro. 3 Kaj
mi petegas vin ankaŭ, sincera kunjugulo, helpu tiujn
virinojn, ĉar ili kunlaboris kun mi en la evangelio,
kune kun Klemento kaj miaj ceteraj kunlaborantoj,
kies nomoj estas en la libro de vivo. 4 Ĝoju en la
Sinjoro ĉiam; denove mi diros: Ĝoju. 5 Via mildeco
estu konata al ĉiuj. La Sinjoro estas proksima. 6 Pri
nenio trozorgu; sed pri ĉio, per preĝo kaj peto kun
dankesprimo, viaj deziroj sciiĝu al Dio. 7 Kaj la paco de
Dio, kiu superas ĉian intelekton, gardos viajn korojn
kaj pensojn en Kristo Jesuo. 8 Fine, fratoj, kio ajn estas
vera, kio ajn honesta, kio ajn justa, kio ajn ĉasta, kio
ajn ŝatinda, kio ajn bonfama; se estas ia virto, se estas
ia laŭdo, tion pripensu. 9 Kion vi lernis kaj ricevis kaj
aŭdis kaj vidis en mi, tion faru; kaj la Dio de paco estos
kun vi. 10 Sed mi forte ĝojas en la Sinjoro, ke vi jam
nun revivigis vian zorgon pri mi; vi ja estis zorgemaj,
sed mankis al vi oportuna tempo. 11 Tamen mi ne
parolas rilate bezonon; ĉar mi lernis, en kia ajn stato
mi estas, en tio esti kontenta. 12 Mi scias humiliĝi,
kaj mi scias ankaŭ esti en abundeco; ĉie kaj ĉiel mi

lernis la sekreton pleniĝi kaj malsati, havi abundon
kaj havi mankon. 13 Mi ĉion povas fari en tiu, kiu
min fortikigas. 14 Tamen vi bone agis, partoprenante
kun mi en mia suferado. 15 Kaj vi mem, Filipianoj,
ankaŭ scias, ke en la komenco de la evangelio, kiam
mi foriris el Makedonujo, neniu eklezio komunikiĝis
kun mi rilate donadon kaj ricevadon, krom vi solaj;
16 ĉar eĉ en Tesaloniko vi pli ol unufoje sendis ion
por mia bezono. 17 Mi ne deziras la donacon; sed mi
deziras la frukton, kiu plimultiĝos por via profito.
18 Sed mi havas ĉion, kaj estas en abundeco; mi jam
pleniĝis, ricevinte per Epafrodito vian senditaĵon,
agrablan odoraĵon, oferon akceptindan, kiu plaĉas al
Dio. 19 Kaj mia Dio satigos ĉian vian bezonon, laŭ Sia
riĉo en gloro en Kristo Jesuo. 20 Nun al nia Dio kaj
Patro estu gloro por ĉiam kaj eterne. Amen. (aiōn g165)
21 Salutu ĉiun sanktulon en Kristo Jesuo. La fratoj, kiuj
estas kun mi, vin salutas. 22 Ĉiuj sanktuloj vin salutas,
precipe tiuj, kiuj estas el la domanaro de Cezaro. 23 La
graco de la Sinjoro Jesuo Kristo estu kun via spirito.

# Koloseanoj

1 Paŭlo, apostolo de Kristo Jesuo per la volo de Dio,
kaj Timoteo, nia frato, 2 al la sanktuloj kaj fidelaj
fratoj en Kristo, kiuj estas en Kolose: Graco al vi kaj
paco estu de Dio, nia Patro. 3 Ni dankas Dion, la Patron
de nia Sinjoro Jesuo Kristo, ĉiam preĝante por vi, 4
aŭdinte pri via fido en Kristo Jesuo kaj pri via amo al
ĉiuj sanktuloj, 5 pro la espero konservita por vi en la
ĉielo, pri kiu vi jam antaŭe aŭdis en la vorto de la
vero de la evangelio, 6 kiu venis ĝis vi, kiel ankaŭ en
la tuta mondo ĝi estas fruktodona kaj kreskanta, kiel
ankaŭ en vi de post tiu tago, en kiu vi aŭdis kaj eksciis
la gracon de Dio laŭ la vero; 7 kiel vi lernis de Epafras,
nia amata kunservanto, kiu estas fidela diakono de
Kristo pro ni, 8 kaj kiu ankaŭ sciigis nin pri via amo
en la Spirito. 9 Tial ni ankaŭ, de post la tago, en kiu ni
tion aŭdis, ne ĉesas preĝi kaj peti por vi, ke vi pleniĝu
per la scio de Lia volo en ĉia spirita saĝo kaj prudento,
10 por ke vi iradu inde je la Sinjoro, al ĉia plaĉado, en
ĉia bona farado fruktodonaj kaj kreskantaj en la scio
de Dio; 11 fortigitaj per ĉia forto laŭ la potenco de Lia
gloro, por ĉia pacienco kaj toleremeco kun ĝojo; 12
dankante la Patron, kiu taŭgigis nin por partopreno
en la heredaĵo de la sanktuloj en lumo, 13 kaj liberigis
nin el la potenco de mallumo, kaj transportis nin en
la regnon de la Filo de Sia amo; 14 en kiu ni havas la
elaĉeton, la pardonon de pekoj; 15 li estas bildo de la
nevidebla Dio, la unuenaskito inter la tuta kreitaro;
16 ĉar en li kreiĝis ĉio en la ĉielo kaj sur la tero,
ĉio videbla kaj nevidebla, ĉu tronoj, ĉu regecoj, ĉu
estrecoj, ĉu aŭtoritatoj; ĉio kreiĝis per li, kaj por li;
17 kaj li estas antaŭ ĉio, kaj en li ĉio ekzistas. 18 Kaj
li estas la kapo de la korpo, la eklezio; kaj li estas la
komenco, la unuenaskita el la mortintoj, por ke li
fariĝu superulo en ĉio. 19 Ĉar la Patro bonvolis, ke
en li la tuta pleneco loĝu; 20 kaj per li kunakordigi
ĉion al Si mem, pacon farinte per la sango de lia
kruco; per li ĉion, ĉu sur la tero, ĉu en la ĉielo. 21
Kaj vin, iam fremdigitajn, kaj mense malamikojn
en malbonaj faroj, li tamen jam kunakordigis 22 en
la korpo de sia karno, per morto, por starigi vin
sanktaj kaj senmakulaj kaj neriproĉeblaj antaŭ li; 23
se efektive vi restas en la fido, fonditaj kaj fiksitaj
kaj firmaj en la espero de la evangelio, kiun vi aŭdis,
kiu estas predikita tra la tuta kreitaro sub la ĉielo,
kaj kies diakono mi, Paŭlo, fariĝis. 24 Nun mi ĝojas
pri miaj suferoj pro vi, kaj plenigas la mankon de la
afliktoj de Kristo en mia karno pro lia korpo, kiu estas
la eklezio; 25 kies diakono mi fariĝis laŭ la aranĝo de
Dio, donita al mi pro vi, por plenumi la vorton de Dio,
26 la misteron, kiu estas kaŝita for de la mondaĝoj kaj
de la generacioj, sed nun klarigita al liaj sanktuloj,
(aiōn g165) 27 al kiuj Dio volis sciigi, kia estis la riĉeco
de la gloro de ĉi tiu mistero inter la nacianoj; kiu
estas Kristo en vi, la espero de gloro; 28 kaj kiun ni
anoncas, admonante ĉiun homon kaj instruante ĉiun
homon en ĉia saĝo, por ke ni starigu ĉiun homon
perfekta en Kristo Jesuo; 29 por tiu celo mi ankaŭ
laboras, klopodante laŭ lia energio, kiu energias en
mi kun potenco.

2 Mi volas do, ke vi sciu, kiel grandan klopodon mi
havas pro vi, kaj pro tiuj en Laodikea, kaj pro ĉiuj,
kiuj ne vidis mian vizaĝon en la karno; 2 por ke iliaj
koroj konsoliĝu, dum ili kunkroĉiĝas en amo, kaj al ĉia
riĉeco de la plena certiĝo de kompreno, por ke ili sciu
la misteron de Dio, Kriston, 3 en kiu estas kaŝitaj ĉiuj
trezoroj de saĝeco kaj de scio. 4 Tion mi diras, por ke
neniu vin trompu per parola allogeco. 5 Ĉar kvankam
mi laŭ karno forestas, tamen laŭ spirito mi estas kun
vi, ĝojante kaj vidante vian ordon kaj la firmecon de
via fido al Kristo. 6 Kiel do vi ricevis Kriston Jesuon,
la Sinjoron, tiel vi iradu en li, 7 enradikigite kaj
konstruite en li, kaj firmigite en la fido, kiel vi estas
instruitaj, kun abundo da dankesprimo. 8 Gardu vin,
ke neniu prirabu vin per filozofio kaj vanta trompo,
laŭ la tradicio de homoj, laŭ la elementoj de la mondo,
kaj ne laŭ Kristo; 9 ĉar en li korpe loĝas la tuta pleneco
de la Dieco, 10 kaj vi estas plenigitaj en li, kiu estas la
kapo de ĉia estreco kaj aŭtoritato; 11 en kiu ankaŭ
vi cirkumcidiĝis per cirkumcido ne manfarita, en la
demeto de la korpo de la karno, en la cirkumcido de
Kristo; 12 enterigite kun li en bapto, en kiu ankaŭ vi
estas kunlevitaj per la fido al la energio de Dio, kiu lin
levis el la mortintoj. 13 Kaj vin, kiuj estis malvivaj per
viaj eraroj kaj la necirkumcido de via karno, Li vivigis
kun li, pardoninte al ni ĉiujn erarojn; 14 elviŝinte la
dekreton kontraŭ ni en ordonoj skribitan, kiu estis al
ni malfavora, kaj li forprenis ĝin el la mezo, najlinte
ĝin al la kruco; 15 kaj foriginte de si la estrecojn kaj la
aŭtoritatojn, parade malkaŝis ilin, triumfante super ili
en ĝi. 16 Neniu do vin juĝu pri manĝaĵo, aŭ trinkaĵo,
aŭ rilate al festo, aŭ novmonato, aŭ sabato; 17 kiuj

estas ombro de la estontaĵoj, sed la korpo apartenas
al Kristo. 18 Neniu forrabu de vi vian premion per
memvola humileco kaj kulto de la anĝeloj, entrudante
sin en tion, kion li ne vidis, vante blovoŝvelinte per
sia karna menso, 19 kaj ne tenante sin al la Kapo, el
kiu la tuta korpo, per la artikoj kaj ligiloj provizita kaj
kunigita, kreskas laŭ la kreskigo de Dio. 20 Se vi mortis
kun Kristo for de la elementoj de la mondo, kial, kiel
vivantaj en la mondo, vi submetiĝas al dekretoj: 21 Ne
tuŝu, ne gustumu, ne palpu, 22 pri ĉio, kio pereas per
la uzado, laŭ la ordonoj kaj doktrinoj de homoj? 23 Ĉio
tio havas ŝajnon de saĝeco en volokulto kaj humileco
kaj severeco rilate al la korpo, sed ne en ia valoro por
plensatigo de la karno.

3 Se do vi estas levitaj kun Kristo, serĉu tion, kio
estas supre, kie Kristo sidas dekstre de Dio. 2
Atentu tion, kio estas supre, ne surteraĵojn. 3 Ĉar
vi mortis, kaj via vivo kaŝiĝis kun Kristo en Dio. 4
Kiam aperos Kristo, nia vivo, tiam vi ankaŭ kun li
aperos en gloro. 5 Malvivigu do viajn membrojn, kiuj
estas sur la tero: malĉastecon, malpurecon, volupton,
malbonan deziron, kaj avidecon, kiu estas idolkulto; 6
pro kio venas la kolero de Dio sur la filojn de malobeo;
7 en kiuj vi ankaŭ iam iradis, kiam vi vivis en ili. 8
Sed nun formetu ankaŭ la jenajn: koleron, pasian
indignon, malicon, kalumnion, hontindan parolon
el via buŝo; 9 ne mensogu unu al alia, ĉar vi jam
formetis la malnovan homon kun liaj agoj, 10 kaj
surmetis la novan homon, kiu estas renovigata al
scio laŭ la bildo de Tiu, kiu lin kreis; 11 kie ne povas
esti Greko kaj Judo, cirkumcido kaj necirkumcido,
barbaro, Skito, sklavo, liberulo, sed Kristo estas ĉio kaj
en ĉio. 12 Surmetu do, kiel elektitoj de Dio, sanktaj kaj
amataj, koron de kompato, bonkorecon, humilecon,
mildecon, toleremecon; 13 reciproke paciencante
kaj pardonante, se iu havas plendon kontraŭ iu; kiel
la Sinjoro pardonis vin, tiel vi ankaŭ faru; 14 kaj
super ĉion tion surmetu amon, kiu estas ligilo de
perfekteco. 15 Kaj la paco de Kristo prezidu en viaj
koroj, al kiu ankaŭ vi estas vokitaj en unu korpo, kaj
estu dankemaj. 16 La vorto de Kristo loĝu en vi riĉe,
en ĉia saĝeco; kaj instruu kaj admonu unu la alian per
psalmoj kaj himnoj kaj spiritaj kantoj, kantante kun
graco en viaj koroj al Dio. 17 Kaj kion ajn vi faras per
vorto aŭ ago, faru ĉion en la nomo de la Sinjoro Jesuo,
dankante Dion, la Patron, per li. 18 Edzinoj, submetiĝu
al viaj edzoj, kiel decas en la Sinjoro. 19 Edzoj, amu
viajn edzinojn, kaj ne maldolĉiĝu kontraŭ ili. 20
Infanoj, obeu viajn gepatrojn en ĉio, ĉar tio plaĉas al
la Sinjoro. 21 Patroj, ne kolerigu viajn infanojn, por ke
ili ne senkuraĝiĝu. 22 Sklavoj, obeu en ĉio al la sinjoroj
laŭ la karno, ne per okulservo, kiel homplaĉantoj, sed
en simpleco de koro, timante la Sinjoron; 23 kaj kion
ajn vi faras, laboru plenanime, kiel por la Sinjoro, kaj
ne por homoj, 24 sciante, ke de la Sinjoro vi ricevos la
rekompencon de la heredaĵo; ĉar vi servas la Sinjoron
Kristo. 25 Sed ĉiu maljuste faranta ricevos returne laŭ
sia maljustaĵo, kaj ne ekzistas personfavorado.

4 Sinjoroj, donu al viaj sklavoj justaĵon kaj egalaĵon,
sciante, ke vi ankaŭ havas Sinjoron en la ĉielo. 2 En
preĝado persistu, viglante en ĝi kun danko; 3 preĝante
samtempe ankaŭ pro ni, por ke Dio malfermu al
ni pordon por la vorto, por paroli la misteron de
Kristo, pro kiu mi estas ankaŭ enkatenita; 4 por ke mi
klarigu ĝin, kiel mi devus paroli. 5 Iradu en saĝeco
rilate al la eksteruloj, elaĉetante la tempon. 6 Via
parolo estu ĉiam kun graco, spicita per salo, por ke
vi sciu, kiel vi devus respondi al ĉiu. 7 Pri ĉiuj miaj
aferoj sciigos vin Tiĥiko, la amata frato kaj fidela
diakono kaj kunservanto en la Sinjoro, 8 kiun mi
sendis al vi ĝuste por tio, ke vi sciiĝu pri nia farto, kaj
ke li konsolu viajn korojn, 9 kune kun Onesimo, la
fidela kaj amata frato, kiu estas el vi. Ili sciigos vin
pri ĉiuj ĉi tieaj aferoj. 10 Salutas vin Aristarĥo, mia
kunmalliberulo, kaj Marko, kuzo de Barnabas (pri kiu
vi ricevis ordonojn: se li venos al vi, akceptu lin), 11
kaj Jesu, nomata Justo, kiuj estas el la cirkumcido; tiuj
solaj estas miaj kunlaborantoj por la regno de Dio,
kiuj estis al mi konsolilo. 12 Salutas vin Epafras, kiu
estas el vi, servisto de Kristo Jesuo, ĉiam klopodeganta
pro vi en siaj preĝoj, por ke vi staru perfektaj kaj
konvinkitaj en la tuta volo de Dio. 13 Ĉar mi atestas
pri li, ke li havas multan fervoron pro vi, kaj pro tiuj,
kiuj estas en Laodikea, kaj en Hierapolis. 14 Salutas
vin Luko, la amata kuracisto, kaj Demas. 15 Salutu la
fratojn en Laodikea, kaj Nimfason, kaj la eklezion en
ilia domo. 16 Kaj kiam la epistolo estos legita ĉe vi,
faru, ke ĝi estu legata ankaŭ en la eklezio en Laodikea;
kaj ke vi ankaŭ legu la epistolon el Laodikea. 17 Kaj
diru al Arĥipo: Zorgu pri la diakoneco, kiun vi ricevis
en la Sinjoro, por ke vi plenumu ĝin. 18 La saluto per

la propra mano de mi, Paŭlo. Memoru miajn katenojn.
Graco estu kun vi.

# 1 Tesalonikanoj

1 Paŭlo kaj Silvano kaj Timoteo al la eklezio de la
Tesalonikanoj en Dio, la Patro, kaj la Sinjoro Jesuo
Kristo: Graco al vi kaj paco. 2 Ni ĉiam dankas Dion
pri vi ĉiuj, memorigante pri vi en niaj preĝoj; 3
memorante senĉese vian laboron de fido kaj penadon
de amo kaj paciencon de espero al nia Sinjoro Jesuo
Kristo, antaŭ nia Dio kaj Patro; 4 sciante, fratoj, amataj
de Dio, vian elekton, 5 ĉar nia evangelio venis al vi ne
nur parole, sed ankaŭ kun potenco kaj kun la Sankta
Spirito kaj plena certigo; vi scias, kiaj homoj ni ĉe vi
montriĝis pro vi. 6 Kaj vi fariĝis imitantoj de ni kaj de
la Sinjoro, ricevinte la vorton en multe da aflikto, kun
ĝojo de la Sankta Spirito; 7 tiel, ke vi fariĝis modelo
por ĉiuj kredantoj en Makedonujo kaj en la Aĥaja
lando. 8 Ĉar de vi la vorto de la Sinjoro estas diseĥita
ne nur en Makedonujo kaj la Aĥaja lando, sed en ĉiu
loko via fido al Dio disvastiĝis, tiel, ke ni ne bezonas
diri ion. 9 Ĉar ili mem pri ni rakontas, kian alvenon ni
havis ĉe vi; kaj kiel vi vin turnis al Dio for de idoloj,
por servi vivantan kaj veran Dion, 10 kaj atendi Lian
Filon el la ĉielo, la Filon, kiun Li levis el la mortintoj,
Jesuon, kiu nin savas de la estonta kolerego.

2 Ĉar vi mem scias, fratoj, ke nia alveno al vi ne
montriĝis senfrukta; 2 sed suferinte kaj insultite en
Filipi, kiel vi scias, ni kuraĝiĝis en nia Dio prediki al vi
la evangelion de Dio meze de granda konflikto. 3 Ĉar
nia instruado ne devenis de eraro, nek de malpureco,
kaj ĝi ne estas kun ruzo; 4 sed kiel Dio nin aprobis, por
konfidi al ni la evangelion, tiel ni parolas, por plaĉi ne
al homoj, sed al Dio, kiu esploras niajn korojn. 5 Ĉar,
kiel vi scias, ni neniam troviĝis kun vortoj flataj, nek
kun avideca preteksto (Dio estas atestanto), 6 nek
celante homan gloron ĉe vi aŭ ĉe iu alia, kvankam
ni povis esti al vi ŝarĝaj, kiel apostoloj de Kristo. 7
Sed ni estis mildaj inter vi, kiel vartistino, fleganta
siajn proprajn infanojn; 8 tiel same ni, sentante por vi
koran inklinon, volonte tiam dividus kun vi, ne nur la
evangelion de Dio, sed ankaŭ niajn proprajn animojn,
ĉar vi fariĝis por ni tre karaj. 9 Ĉar vi memoras, fratoj,
nian penadon kaj laboregon: nokte kaj tage laborante,
por ke ni ne fariĝu ŝarĝo por iu el vi, ni predikadis al
vi la evangelion de Dio. 10 Vi estas atestantoj, kaj Dio
ankaŭ, kiel sankte kaj juste kaj senkulpe ni kondutis
ĉe vi kredantoj; 11 kiel vi scias, ke por ĉiu el vi ni
estis kiel patro ĉe siaj infanoj, vin admonante kaj
kuraĝigante, kaj petegante, 12 ke vi iradu inde je Dio,
kiu vin vokas en Sian regnon kaj gloron. 13 Pro ĉi
tio ankaŭ ni senĉese dankas Dion, ke ricevinte per
nia parolo la vorton de Dio, vi akceptis ne la homan
vorton, sed, kiel ĝi vere estas, la Dian vorton, kiu
ankaŭ energias en vi, kiuj kredas. 14 Ĉar vi, fratoj,
fariĝis imitantoj de la eklezioj de Dio en Kristo Jesuo,
kiuj estas en Judujo; ĉar tiajn samajn suferojn vi ankaŭ
spertis ĉe viaj samlandanoj, kiajn tiuj ĉe la Judoj, 15
kiuj mortigis la Sinjoron Jesuo kaj la profetojn, kaj nin
elpelis, kaj ne plaĉas al Dio, kaj estas kontraŭuloj al
ĉiuj homoj; 16 ili malhelpis al ni prediki al la nacianoj,
por ke ili saviĝu, por kompletigi ĉiam la sumon de
siaj pekoj; kaj sur ilin venis la kolero ĝis ekstrema
mezuro. 17 Sed, fratoj, ni, senigite je vi dum kelka
tempo, persone, ne kore, des pli fervore klopodis vidi
vian vizaĝon kun multa sopiro; 18 ĉar ni deziris veni al
vi; mi, Paŭlo, tion deziris pli ol unufoje; sed malhelpis
nin Satano. 19 Ĉar kio estas nia espero, aŭ ĝojo, aŭ
krono de singratulado? Ĉu ĝi ja ne estas vi, antaŭ nia
Sinjoro Jesuo Kristo ĉe lia alveno? 20 Ĉar vi estas nia
gloro kaj nia ĝojo.

3 Kiam do ni jam ne povis resti trankvilaj, ni decidis
esti lasitaj solaj en Ateno; 2 kaj ni sendis Timoteon,
nian fraton kaj servanton de Dio en la evangelio de
Kristo, por firmigi vin kaj konsoli vin pri via fido,
3 por ke neniu estu ŝancelita de tiuj afliktoj; ĉar vi
mem scias, ke ili apartenas al nia sorto. 4 Ĉar kiam ni
estis ĉe vi, ni antaŭdiris al vi, ke ni nepre suferos;
kaj tio efektive okazis, kiel vi ja scias. 5 Pro tio mi
ankaŭ, kiam mi jam ne povis resti trankvila, sendis,
por ke mi certiĝu pri via fido, pro timo, ke eble la
tentanto vin tentis kaj ke nia laboro fariĝos senutila.
6 Sed kiam Timoteo, ĵus veninte al ni de vi, donis al
ni bonajn sciigojn pri via fido kaj via amo, kaj ke vi
ĉiam memoras nin bonkore, sopirante vidi nin, kiel ni
ankaŭ vin, 7 pro tio ni konsoliĝis, fratoj, pri vi, en
ĉia nia malĝojo kaj aflikto, per via fido; 8 ĉar nun
ni vivas, se vi staras firme en la Sinjoro. 9 Ĉar kian
dankon ni povas repagi al Dio pri vi, pro la tuta ĝojo,
per kiu ni ĝojas pro vi antaŭ Dio; 10 nokte kaj tage
preĝante fervore, ke ni povu vidi vian vizaĝon kaj
perfektigi la mankojn de via fido? 11 Nia Dio kaj Patro
mem kaj nia Sinjoro Jesuo direktu nian vojon al vi; 12
kaj la Sinjoro pligrandigu kaj abundigu ĉe vi la amon

de unu al la alia kaj al ĉiuj, kiel ni amas vin; 13 por ke
li faru viajn korojn senkulpaj kaj sanktaj antaŭ nia
Dio kaj Patro, ĉe la alveno de nia Sinjoro Jesuo kun
ĉiuj liaj sanktuloj.

4 Fine do, fratoj, ni petegas kaj admonas vin en la
Sinjoro Jesuo, ke kiamaniere vi lernis de ni, kiel
vi devus iradi kaj plaĉi al Dio (kaj vi ja tiel iradas),
tiamaniere vi pli kaj pli abunde agu. 2 Ĉar vi scias,
kian admonon ni donis al vi en la Sinjoro Jesuo. 3
Ĉar jen estas la volo de Dio, via sanktiĝo, ke vi vin
detenu de malĉasteco; 4 ke ĉiu el vi sciu preni al si
sian propran aĵon en sankteco kaj honoro, 5 ne en
la pasio de volupto, kiel la nacianoj, kiuj ne konas
Dion; 6 ke neniu peku kaj trompu sian fraton en ĉi
tio; ĉar la Eternulo estas venĝanto en ĉio tio, kiel
ankaŭ ni antaŭavertis vin kaj atestis. 7 Ĉar Dio nin
vokis ne por malpureco, sed por sanktiĝo. 8 Tiu do,
kiu malakceptas, malakceptas ne homon, sed Dion,
kiu donas al vi Sian Sanktan Spiriton. 9 Sed pri amo
al la frataro, vi ne bezonas, ke oni skribu al vi, ĉar
vi mem estas instruitaj de Dio ami unu la alian; 10
ĉar vi ja tion faras al ĉiuj fratoj, kiuj estas en la tuta
Makedonujo. Sed ni admonas vin, fratoj, ke vi amu
pli kaj pli abunde, 11 kaj ke vi celu esti kvietaj, kaj
fari viajn proprajn aferojn, kaj labori per viaj manoj,
ĝuste kiel ni al vi ordonis; 12 por ke vi iradu konvene
antaŭ tiuj, kiuj estas ekstere, kaj por ke nenio al vi
manku. 13 Sed ni ne volas, fratoj, ke vi ne sciu pri
tiuj, kiuj endormiĝis; por ke vi ne malĝoju, kiel la
ceteraj, kiuj havas nenian esperon. 14 Ĉar se ni kredas,
ke Jesuo mortis kaj releviĝis, tiel ankaŭ tiujn, kiuj
endormiĝis en Jesuo, Dio venigos kun li. 15 Ĉar ni
diras al vi per la vorto de la Sinjoro, ke ni, kiuj estos
vivaj, restantaj ĝis la alveno de la Sinjoro, tute ne
havos lokon antaŭ la endormiĝintoj. 16 Ĉar la Sinjoro
mem malsupreniros de la ĉielo, kun signalkrio, kun
la voĉo de la ĉefanĝelo, kaj kun la trumpeto de Dio;
kaj la mortintoj en Kristo leviĝos la unuaj; 17 poste
ni, kiuj vivas, ankoraŭ restantaj, estos kune kun ili
suprenkaptitaj en la nubojn, por renkonti la Sinjoron
en la aero; kaj tiel ni estos por ĉiam kun la Sinjoro. 18
Tial per tiuj vortoj konsolu unu la alian.

5 Sed pri la tempoj kaj okazoj, fratoj, vi ne bezonas,
ke oni skribu al vi. 2 Ĉar vi mem tute bone scias, ke
la tago de la Sinjoro venas, kiel ŝtelisto en la nokto. 3
Dum oni diras: Paco kaj sendanĝereco, tiam subita
detruo venas sur ilin, kiel naskodoloro al gravedulino,
kaj ili tute ne forsaviĝos. 4 Sed vi, fratoj, ne estas
en mallumo tiel, ke tiu tago vin trafus kiel ŝtelisto;
5 ĉar vi ĉiuj estas filoj de lumo kaj filoj de la tago;
ni ne estas el la nokto, nek el mallumo; 6 tial ni ne
dormu, kiel la ceteraj, sed ni viglu kaj estu sobraj.
7 Ĉar kiuj dormas, tiuj dormas en la nokto; kaj kiuj
ebriiĝas, tiuj ebriiĝas en la nokto. 8 Sed ĉar ni estas
el la tago, ni estu sobraj, surmetante la kirason de
fido kaj amo, kaj, kiel kaskon, la esperon de savo. 9
Ĉar Dio nin destinis ne al kolero, sed al la ricevo de
savado per nia Sinjoro Jesuo Kristo, 10 kiu mortis por
ni, por ke ni vivu kune kun li, ĉu ni maldormos aŭ
dormos. 11 Tial admonu vin reciproke kaj edifu unu la
alian, kiel ankaŭ vi jam faradas. 12 Sed ni petegas vin,
fratoj, koni tiujn, kiuj laboras ĉe vi kaj estras ĉe vi en
la Sinjoro kaj vin admonas, 13 kaj estimi ilin treege
kun amo pro ilia laboro. Estu pacemaj unu kun la alia.
14 Kaj ni petas vin, fratoj, admonu la senordulojn,
kuraĝigu la nebravulojn, subtenu la malfortulojn, estu
paciencaj kontraŭ ĉiuj. 15 Zorgu, ke neniu redonu al
iu malbonon por malbono; sed ĉiam sekvu tion, kio
estas bona, unu por alia kaj por ĉiuj. 16 Ĝoju ĉiam; 17
preĝu senĉese; 18 pri ĉio donu dankon; ĉar tia estas la
volo de Dio en Kristo Jesuo pri vi. 19 Ne estingu la
Spiriton; 20 ne malestimu profetaĵojn; 21 elprovu ĉion;
tenu firme tion, kio estas bona; 22 detenu vin de ĉia
formo de malbono. 23 Kaj la Dio de paco vin sanktigu
tute; kaj via spirito kaj animo kaj korpo estu plene
konservitaj sen kulpo, ĉe la alveno de nia Sinjoro
Jesuo Kristo. 24 Fidela estas Tiu, kiu vin vokas, kiu
ankaŭ faros. 25 Fratoj, preĝu por ni. 26 Salutu ĉiujn
fratojn per sankta kiso. 27 Mi solene petegas vin per
la Sinjoro, ke oni legu ĉi tiun epistolon antaŭ la tuta
frataro. 28 La graco de nia Sinjoro Jesuo Kristo estu
kun vi.

# 2 Tesalonikanoj

**1** Paŭlo kaj Silvano kaj Timoteo al la eklezio de la Tesalonikanoj en Dio, nia Patro, kaj la Sinjoro Jesuo Kristo: 2 Graco al vi kaj paco de Dio, la Patro, kaj de la Sinjoro Jesuo Kristo. 3 Ni devas ĉiam danki Dion pro vi, fratoj, kiel estas ja dece, pro tio, ke via fido kreskas treege, kaj abundas via reciproka amo de ĉiu al ĉiu, 4 tiel, ke ni mem fanfaronas pri vi en la eklezioj de Dio, pro via pacienco kaj fido sub ĉiuj viaj persekutoj kaj afliktoj, kiujn vi elportadas; 5 tio estas evidenta signo de la justa juĝo de Dio; por ke vi montriĝu indaj je la regno de Dio, por kiu vi ankaŭ suferas; 6 ĉar estas justaĵo ĉe Dio redoni afliktojn al tiuj, kiuj vin afliktas, 7 kaj al vi, la afliktataj, ripozon kun ni, ĉe la malkaŝiĝo de la Sinjoro Jesuo el la ĉielo kun la anĝeloj de lia potenco, 8 en flamanta fajro, por venigi venĝon sur tiujn, kiuj ne konas Dion kaj ne obeas al la evangelio de nia Sinjoro Jesuo; 9 kiuj suferos punadon, eternan detruon de antaŭ la vizaĝo de la Sinjoro kaj de la gloro de lia potenco, (aiōnios g166) 10 kiam li venos por esti glorata en siaj sanktuloj, kaj esti admirata ĉe ĉiuj, kiuj ekkredis (ĉar nia atestado ĉe vi estis kredata) en tiu tago. 11 Por tiu celo ni ankaŭ konstante preĝas por vi, ke nia Dio vin trovu indaj je la voko, kaj kun potenco plenumu ĉiun bonvolon de boneco kaj ĉiun laboron de fido; 12 por ke la nomo de nia Sinjoro Jesuo estu glorata en vi, kaj vi en li, laŭ la graco de nia Dio kaj la Sinjoro Jesuo Kristo.

**2** Nun ni petegas vin, fratoj, koncerne la alvenon de nia Sinjoro Jesuo Kristo kaj nian alkolektiĝon al li, 2 ke vi ne fariĝu facile skueblaj mense, kaj ne konsterniĝu, ĉu per spirito, aŭ per parolo, aŭ per letero ŝajne de ni, kvazaŭ la tago de la Sinjoro jam apudestus; 3 neniu vin trompu iamaniere; ĉar nepre antaŭe okazos la apostateco, kaj la homo de peko malkaŝiĝos, la filo de pereo, 4 kiu kontraŭmetas sin kaj levas sin super ĉion, kion oni nomas Dio aŭ adoras; tiel, ke li sidas en la templo de Dio, elmontrante sin, kvazaŭ li estas Dio. 5 Ĉu vi ne memoras, ke mi diris tion al vi, dum mi estis kun vi? 6 Kaj nun vi scias, kio malhelpas, por ke li malkaŝiĝu siatempe. 7 Ĉar la mistero de maljusteco jam energias; sed restas ankoraŭ la malhelpanto, ĝis li estos formovita. 8 Kaj tiam malkaŝiĝos la maljustulo, kiun la Sinjoro Jesuo detruos per la spiro de sia buŝo kaj neniigos per la apero de sia alveno; 9 tiun, kies alveno estas pro la energio de Satano kun ĉia potenco kaj kun signoj kaj mensogaj mirindaĵoj, 10 kaj kun ĉia trompo de maljusteco por la pereantoj, pro tio, ke ili ne ricevis la amon al la vero por esti savitaj. 11 Kaj pro tio Dio sendas al ili energion de eraro, tiel, ke ili kredos mensogon; 12 por ke estu juĝataj ĉiuj, kiuj ne kredis la veron, sed trovis plezuron en maljusteco. 13 Sed ni devas ĉiam danki Dion pro vi, fratoj, amataj de la Sinjoro, pro tio, ke Dio vin elektis de la komenco al savo en la sanktigo de la Spirito kaj kredo al la vero; 14 al kiu Li vin vokis per nia evangelio, por la akiro de la gloro de nia Sinjoro Jesuo Kristo. 15 Tial, fratoj, staru firme, kaj tenu la tradiciojn, kiujn vi lernis ĉu per parolo, aŭ per ia letero nia. 16 Nia Sinjoro Jesuo Kristo mem, kaj Dio, nia Patro, kiu nin amis kaj al ni donis eternan konsolon kaj bonan esperon per graco, (aiōnios g166) 17 konsolu viajn korojn kaj fortigu ilin por ĉia bona faro kaj vorto.

**3** Fine, fratoj, preĝu por ni, ke la vorto de la Sinjoro disvastiĝu kaj estu glorata, kiel ankaŭ ĉe vi; 2 kaj ke ni forsaviĝu de senprudentaj kaj malbonaj homoj; ĉar ne ĉe ĉiuj estas la fido. 3 Sed fidela estas la Sinjoro, kiu vin fortikigos kaj vin defendos kontraŭ la malbonulo. 4 Sed ni fidas la Sinjoron rilate vin, ke vi faras kaj faros tion, kion ni ordonas. 5 Kaj la Sinjoro direktu viajn korojn en la amon al Dio kaj en la paciencon de Kristo. 6 Ni ordonas al vi, fratoj, en la nomo de la Sinjoro Jesuo Kristo, ke vi vin apartigu for de ĉiu frato, kiu iradas senorde kaj ne laŭ la tradicio, kiun oni ricevis de ni. 7 Ĉar vi mem scias, kiel vi devas nin imiti; ĉar ni ne kondutis senorde inter vi; 8 nek manĝis panon donace de iu, sed per laboro kaj penado, nokte kaj tage laborante, por ke ni ne fariĝu ŝarĝo por iu el vi; 9 ne kvazaŭ ni ne havus tian rajton, sed por estigi nin ekzemplo antaŭ vi, ke vi nin imitu. 10 Ĉar eĉ kiam ni estis ĉe vi, la jenon ni ordonis al vi: Se iu ne volas labori, tiu ankaŭ ne manĝu. 11 Ĉar ni aŭdas, ke inter vi iradas senorde kelkaj, kiuj tute ne laboras, sed en ĉies aferojn sin enŝovas. 12 Tiajn ni ordonas kaj admonas pro la Sinjoro Jesuo Kristo, ke kviete ili laboru kaj manĝu sian propran panon. 13 Sed vi, fratoj, ne laciĝu en bonfarado. 14 Sed se iu ne obeos al la parolo de ĉi tiu nia epistolo, rimarku tiun, kaj ne estu por li kamaradoj, por ke li hontiĝu. 15 Tamen ne rigardu lin kiel malamikon, sed admonu lin kiel fraton. 16 La

Sinjoro de paco mem donu al vi pacon ĉiutempe kaj
ĉiumaniere. La Sinjoro estu kun vi ĉiuj. 17 La saluto de
mi, Paŭlo, per mia propra mano, kiu estas la signo en
ĉiu epistolo; tiel mi skribas. 18 La graco de nia Sinjoro
Jesuo Kristo estu kun vi ĉiuj.

# 1 Timoteo

1 Paŭlo, apostolo de Kristo Jesuo, laŭ la ordono de
Dio, nia Savanto, kaj Kristo Jesuo, nia espero, 2
al Timoteo, mia vera filo en fido: Graco, kompato,
kaj paco de Dio, la Patro, kaj de Kristo Jesuo,
nia Sinjoro. 3 Kiel mi, ekironte en Makedonujon,
petis vin resti en Efeso, por ke vi admonu kelkajn
homojn, ke ili ne instruu alian doktrinon, 4 nek
atentu fabelojn kaj senfinajn genealogiojn, kiuj naskas
diskutojn, pli ol tiun administradon de Dio, kiu
estas laŭ la fido — tiel faru. 5 Sed la celo de la
admono estas amo el pura koro kaj bona konscienco
kaj sincera fido; 6 kion maltrafinte, kelkaj homoj
sin deturnis al vanta babilado, 7 dezirante esti
instruistoj de la leĝo, kvankam ili ne komprenas
tion, kion ili diras, nek tion, pri kio ili faras aserton.
8 Sed ni scias, ke la leĝo estas bona, se oni ĝin
laŭleĝe uzas, 9 sciante, ke la leĝo ekzistas ne por
justulo, sed por homoj senleĝaj kaj malobeemaj,
malpiaj kaj pekemaj, malsanktaj kaj profanaj,
por patromortigantoj kaj patrinomortigantoj,
hommortigantoj, 10 malĉastuloj kaj viruzaĉantoj,
homŝtelistoj, mensogantoj, falseĵurantoj, kaj ĉio ajn
alia kontraŭa al la sana doktrino; 11 laŭ la konfidita al
mi evangelio de la gloro de la benata Dio. 12 Mi dankas
Kriston Jesuon, nian Sinjoron, kiu min kapabligas,
tial, ke li trovis min fidela, destinante min al sia
servado; 13 kvankam mi antaŭe estis blasfemanto
kaj persekutanto kaj insultanto; tamen mi ricevis
kompaton, ĉar mi tion faris nesciante kaj nekredante;
14 kaj la graco de nia Sinjoro abunde sufiĉegis kun
fido kaj amo, kiuj estas en Kristo Jesuo. 15 Fidinda
estas la diro, kaj inda je plena akcepto, ke Kristo Jesuo
envenis en la mondon, por savi pekantojn, el kiuj
mi estas la ĉefa; 16 tamen pro tiu kaŭzo mi ricevis
kompaton, por ke en mi, kiel la ĉefa, Jesuo Kristo
elmontru sian tutan paciencegon, kiel ekzemplo por
tiuj, kiuj poste kredos al li por eterna vivo. (aiōnios g166)
17 Nun al la Reĝo eterna, senmorta, nevidebla, la sola
Dio, estu honoro kaj gloro por ĉiam kaj eterne. Amen.
(aiōn g165) 18 Ĉi tiun zorgadon mi komisias al vi, mia
filo Timoteo, laŭ la profetaĵoj, kiuj antaŭiris sur vin,
ke per ili vi militadu la bonan militon, 19 tenante
la fidon kaj bonan konsciencon, kiun forpuŝinte de
si, kelkaj homoj ŝippereis rilate la fidon; 20 el kiuj
estas Himeneo kaj Aleksandro, kiujn mi transdonis al
Satano, por ke ili lernu ne blasfemi.

2 Mi konsilas do, antaŭ ĉio, fari petegojn, preĝojn,
propetadojn, dankojn por ĉiuj; 2 por reĝoj kaj ĉiuj
eminentuloj, por ke ni vivadu trankvile kaj kviete
en plena pieco kaj seriozeco. 3 Tio estas bona kaj
akceptebla antaŭ Dio, nia Savanto, 4 kiu volas, ke ĉiuj
homoj estu savitaj kaj venu al la scio de la vero. 5 Ĉar
ekzistas unu Dio, kaj unu interulo inter Dio kaj homoj,
homo, Kristo Jesuo, 6 kiu sin donis kiel elaĉetaĵon
por ĉiuj, ateston elmontrotan en konvenaj tempoj;
7 por kio mi estas nomita predikisto kaj apostolo
(mi diras la veron, mi ne mensogas), instruisto por
la nacianoj en fido kaj vero. 8 Mi deziras do, ke la
viroj preĝu en ĉiu loko, levante sanktajn manojn,
sen kolero kaj disputado. 9 Tiel same, ke virinoj sin
vestu per decaj vestoj, kun modesteco kaj sobreco; ne
kun harplektaĵoj, aŭ oro, aŭ perloj, aŭ multekostaj
vestoj; 10 sed (kio konvenas al virinoj konfesantaj
la piecon) per bonfaroj. 11 Virino lernu en kvieteco
kun ĉia submetiĝo. 12 Sed mi ne permesas al virino
instruadi, nek regi super viro, sed esti en kvieteco. 13
Ĉar Adam kreiĝis la unua, poste Eva; 14 kaj Adam ne
trompiĝis; sed la virino, trompite, falis en pekon; 15
sed ŝi saviĝos per la naskado, se ili daŭras en fido kaj
amo kaj sanktiĝo kun sobreco.

3 Fidinda estas la diro: Se iu celas episkopecon, tiu
deziras bonan laboron. 2 Episkopo do devas esti
neriproĉebla, edzo de unu edzino, sobra, moderema,
ordema, gastama, instruema, 3 ne vindrinkema, ne
batema; sed mildanima, ne disputema, ne monamanto;
4 reganta bone sian propran domanaron, tenante
siajn gefilojn sub regado kun ĉia seriozeco 5 (sed se
iu ne scias regi sian propran domon, kiel li zorgos
pri la eklezio de Dio?); 6 ne novico, por ke li ne
ŝvelu per fiereco kaj ne falu en la kondamnon de la
diablo. 7 Krom tio li devas havi bonan ateston de la
eksteruloj, por ke li ne falu en riproĉon kaj kaptilon
de la diablo. 8 Tiel same diakonoj devas esti seriozaj,
ne duflanke parolantaj, ne tro amantaj vinon, ne
avidantaj malhonoran gajnon; 9 tenantaj la misteron
de la fido en pura konscienco. 10 Kaj tiuj ankaŭ estu
unue provitaj; poste ili servu kiel diakonoj, se ili estos
neriproĉeblaj. 11 Virinoj ankaŭ devas esti seriozaj, ne
kalumniantoj, sobraj, fidelaj pri ĉio. 12 La diakonoj
estu edzoj de po unu edzino, regantaj bone siajn

gefilojn kaj siajn proprajn domojn. 13 Ĉar tiuj, kiuj
bone servadis kiel diakonoj, akiras al si bonan gradon
kaj grandan kuraĝon en la fido, kiu estas en Kristo
Jesuo. 14 Ĉi tion mi skribas al vi, esperante veni al vi
baldaŭ, 15 sed se mi prokrastos, por ke vi komprenu,
kiel oni devas konduti en la domo de Dio, kiu estas
la eklezio de la vivanta Dio, la kolono kaj bazo de la
vero. 16 Kaj laŭ konsento, granda estas la mistero de
pieco: Tiu, kiu elmontriĝis en la karno, praviĝis en
la spirito, estis vidita de anĝeloj, pripredikita ĉe la
nacioj, prikredita en la mondo, prenita supren en
gloro.

4 Sed la Spirito klare diras, ke en la venontaj tempoj
kelkaj defalos de la fido, atentante delogantajn
spiritojn kaj doktrinojn de demonoj, 2 per la
hipokriteco de trompantoj, kiuj havas la konsciencon
kaŭterizitan kvazaŭ per brule varmega fero, 3
admonante ne edziĝi, kaj deteni sin de manĝaĵoj,
kiujn Dio kreis por ke ili estu danke ricevitaj de tiuj,
kiuj kredas kaj scias la veron. 4 Ĉar ĉiu kreitaĵo de Dio
estas bona, kaj nenio devas esti forĵetita, se oni ĝin
ricevas kun dankesprimo, 5 ĉar ĝi estas sanktigita
per la parolo de Dio kaj per preĝo. 6 Se vi memorigos
la fratojn pri tio, vi estos bona servanto de Kristo
Jesuo, nutrita per la vortoj de la fido kaj de la bona
doktrino, kiun vi jam sekvis; 7 sed forrifuzu profanajn
kaj avinajn fabelojn. Kaj ekzercu vin al pieco; 8 ĉar
korpa ekzercado malmulte utilas; sed pieco utilas
al ĉio, havante promeson pri la nuna vivo kaj pri
la estonta. 9 Fidinda estas la diro, kaj inda je plena
akcepto. 10 Ĉar por tio ni laboras kaj batalas, ĉar ni
apogas nian esperon sur la vivantan Dion, kiu estas la
Savanto de ĉiuj homoj, precipe de la kredantoj. 11
Tion ordonu kaj instruu. 12 Neniu malestimu vian
junecon, sed vi estu ekzemplo al la kredantoj, per
parolo, per konduto, per amo, per fido, per ĉasteco.
13 Ĝis mi venos, atentu legadon, konsilon, instruadon.
14 Ne malŝatu la donacon, kiu estas en vi, donita al vi
per profetado, kun la surmetado de la manoj de la
presbiteraro. 15 Estu diligenta pri tiuj aferoj; dediĉu
vin al ili, por ke via progreso evidentiĝu al ĉiuj. 16
Zorgu pri vi mem kaj pri via instruo. Persistu en tio;
ĉar, tion farante, vi savos vin mem, kaj tiujn, kiuj vin
aŭskultas.

5 Ne riproĉu maljunulon, sed konsilu lin, kiel patron;
la pli junajn virojn, kiel fratojn; 2 la maljunulinojn,
kiel patrinojn; la pli junajn virinojn, kiel fratinojn,
kun ĉia ĉasteco. 3 Respektu tiujn vidvinojn, kiuj estas
efektive vidvinoj. 4 Sed se iu vidvino havas filojn
aŭ nepojn, ĉi tiuj lernu unue montri piecon ĉe sia
propra familio kaj rekompenci siajn gepatrojn; ĉar tio
estas akceptebla antaŭ Dio. 5 Tiu, kiu estas efektiva
vidvino kaj izolitino, apogas sian esperon sur Dion,
kaj persistas en petegoj kaj preĝoj nokte kaj tage.
6 Sed la voluptamanta, ankoraŭ vivante, malvivas.
7 Tion ankaŭ ordonu, por ke ili estu sen riproĉo. 8
Sed se iu ne zorgas pri siaj propraj, kaj precipe pri
siaj familianoj, tiu malkonfesis la fidon, kaj estas pli
malbona ol nekredanto. 9 Estu registrata kiel vidvino
tiu, kiu havas ne malpli ol sesdek jarojn, estis edzino
de unu viro, 10 estas bone atestata pri bonfarado,
edukis infanojn, gastigis fremdulojn, lavis la piedojn
de la sanktuloj, helpis la suferantojn, kaj sekvis ĉian
bonfaradon. 11 Sed la pli junajn vidvinojn malakceptu;
ĉar post kiam ili ekfariĝos luksemaj kontraŭ Kristo,
ili deziras edziniĝi, 12 meritante kondamnon, ĉar
ili vantigis sian unuan fidon. 13 Krom tio ili lernas
esti senutilaj, rondirante de domo al domo; kaj ne
sole senutilaj, sed ankaŭ babilemaj kaj sintrudemaj,
parolante nekonvenaĵojn. 14 Mi volas do, ke la pli
junaj edziniĝu, nasku infanojn, mastrumadu, ne donu
al la malamiko pretekston por kalumnio; 15 ĉar kelkaj
jam turniĝis flanken post Satano. 16 Se iu kredantino
havas vidvinojn, ŝi helpu ilin, kaj la eklezio ne estu
ŝarĝata; por ke ĝi helpu la efektivajn vidvinojn. 17 La
presbiteroj, kiuj regas bone, estu rigardataj kiel indaj
je duobla honoro, precipe tiuj, kiuj laboras super la
vorto kaj instruado. 18 Ĉar la Skribo diras: Ne fermu la
buŝon al bovo draŝanta. Kaj: La laboristo meritas sian
salajron. 19 Kontraŭ presbitero ne akceptu denuncon
krom ĉe du aŭ tri atestantoj. 20 La pekintojn riproĉu
antaŭ la okuloj de ĉiuj, por ke la ceteraj ankaŭ
timu. 21 Mi admonas vin antaŭ Dio kaj Kristo Jesuo
kaj la elektitaj anĝeloj, ke vi zorgu pri tiuj aferoj
sen antaŭjuĝo, farante nenion pro partieco. 22 Sur
neniun surmetu la manojn tro rapidece, kaj ne estu
partoprenanto en la pekoj de aliaj; konservu vin ĉasta.
23 Ne plu estu akvotrinkanto, sed uzu iom da vino
pro la stomako kaj viaj oftaj malfortoj. 24 La pekoj de
unuj estas evidentaj, antaŭirantaj al la juĝo; kaj aliajn
homojn ili sekvas. 25 Tiel same ankaŭ ekzistas bonaj
faroj, kiuj estas evidentaj, kaj la alispecaj ne povas
esti kaŝitaj.

6 Ĉiuj subjugaj sklavoj rigardu siajn estrojn kiel
indajn je ĉia honoro, por ke la nomo de Dio kaj la
doktrino ne estu blasfemataj. 2 Kaj tiuj, kiuj havas
kredantajn estrojn, ne malestimu ilin tial, ke ili
estas fratoj, sed servu al ili tiom pli, ĉar tiuj, kiuj
partoprenas en la Didonaco, estas fidelaj kaj amataj.
Tion instruu kaj konsilu. 3 Se iu instruas malsame
kaj ne konsentas al sanaj vortoj, la vortoj de nia
Sinjoro Jesuo Kristo, kaj al la laŭpieca doktrino, 4
tiu estas fanfaronema, nenion sciante, sed malsana
je demandoj kaj privortaj diskutoj, de kiuj naskiĝas
envio, malpaco, mallaŭdoj, malbonaj suspektoj, 5
disputadoj de homoj mense perversigitaj kaj senigitaj
je la vero, supozantaj, ke la pieco estas gajnilo. 6 Sed
la pieco kun kontenteco estas granda gajnilo; 7 ĉar
ni nenion enportis en la mondon, kaj ni ne povas
ion forporti; 8 sed havante manĝaĵojn kaj vestojn, ni
estos per tio kontentaj. 9 Tamen tiuj, kiuj volas riĉiĝi,
falas en tenton kaj kaptilon kaj multajn malsaĝajn kaj
malutilajn dezirojn tiajn, kiaj dronigas la homojn en
detruo kaj pereo. 10 Ĉar la amo al mono estas radiko
de ĉia malbono; celante al tio, kelkaj forvagis de la fido
kaj sin trapikis per multaj malĝojoj. 11 Sed vi, ho homo
de Dio, forsaviĝu de tiaj aferoj, kaj sekvu justecon,
piecon, fidon, amon, paciencon, mildecon. 12 Batalu la
bonan batalon de la fido, kaj ektenu la eternan vivon,
al kiu vi estas vokita kaj konfesis la bonan konfeson
antaŭ multaj atestantoj. (aiōnios g166) 13 Mi vin admonas
antaŭ Dio, kiu ĉion vivigadas, kaj antaŭ Kristo Jesuo,
kiu antaŭ Pontio Pilato atestis la bonan konfeson, 14
ke vi plenumu la ordonon sen makulo, sen riproĉo, ĝis
la apero de nia Sinjoro Jesuo Kristo, 15 kiun aperon en
Siaj propraj tempoj montros Tiu, kiu estas la benata
kaj sola Potenculo, la Reĝo de reĝoj kaj Sinjoro de
sinjoroj, 16 kiu sola havas senmortecon, loĝante en
lumo neatingebla, kaj kiun neniu vidis nek povas
vidi, al kiu estu honoro kaj potenco eterna. Amen.
(aiōnios g166) 17 Admonu tiujn, kiuj estas riĉaj en la nuna
mondo, ke ili ne estu arogantaj, kaj ke ili apogu sian
esperon ne sur la malcertecon de la riĉo, sed sur Dion,
kiu donas al ni riĉe ĉion por ĝuado; (aiōn g165) 18 ke
ili bone agadu, ke ili estu riĉaj je bonaj faroj, ke ili
estu pretaj disdoni, simpatiemaj; 19 provizante por si
bonan fundamenton kontraŭ la venonta tempo, por
ke ili ektenu la efektivan vivon. 20 Ho Timoteo, gardu
tion, kio estas komisiita al vi, deturnante vin for de la
babiladoj kaj kontraŭparoloj de la falsenomata scio;
21 kiun konfesante, kelkaj maltrafis rilate la fidon.
Graco estu kun vi.

# 2 Timoteo

1 Paŭlo, apostolo de Kristo Jesuo, per la volo de Dio,
laŭ la promeso de vivo, kiu estas en Kristo Jesuo, 2
al Timoteo, mia amata filo: Graco, kompato, kaj paco
de Dio, la Patro, kaj de Kristo Jesuo, nia Sinjoro. 3
Mi dankas Dion, kiun mi adoras de post miaj praavoj
kun pura konscienco, ke konstantan memoron mi
havas pri vi en miaj preĝoj, nokte kaj tage 4 sopirante
vidi vin, memorante viajn larmojn, por ke mi pleniĝu
de ĝojo; 5 ricevinte rememoron pri la sincera fido,
kiu estas en vi, kaj kiu loĝis unue en via avino Lois
kaj en via patrino Eŭnike, kaj, mi konvinkiĝis, en vi
ankaŭ. 6 Pro tio mi memorigas vin, ke vi reekbruligu
la donacon de Dio, kiu estas en vi per la surmetado
de miaj manoj. 7 Ĉar Dio donis al ni spiriton ne de
malkuraĝeco, sed de potenco kaj amo kaj sinregado.
8 Ne hontu do pri la atesto de nia Sinjoro, nek pri
mi, lia malliberulo; sed kunelportu suferojn kun la
evangelio laŭ la potenco de Dio, 9 kiu nin savis kaj
vokis per sankta voko, ne laŭ niaj faroj, sed laŭ Sia
propra antaŭintenco kaj laŭ la graco donita al ni
en Kristo Jesuo antaŭ tempoj eternaj, (aiōnios g166) 10
sed nun malkaŝita per la apero de nia Savanto Jesuo
Kristo, kiu neniigis la morton kaj enlumigis la vivon
kaj la senmortecon per la evangelio, 11 al kiu mi estas
nomita predikisto kaj apostolo kaj instruisto. 12 Pro
tio mi ankaŭ suferas tiel; tamen mi ne hontas; ĉar mi
konas tiun, al kiu mi kredis, kaj mi konvinkiĝis, ke li
havas la povon gardi mian konfiditaĵon ĝis tiu tago.
13 Konservu la modelon de sanaj vortoj, kiujn vi aŭdis
de mi, en fido kaj amo, kiuj estas en Kristo Jesuo. 14
La bonan konfiditaĵon gardu per la Sankta Spirito,
kiu loĝas en ni. 15 Vi scias, ke forturniĝis de mi ĉiuj
en Azio, el kiuj estas Figelo kaj Hermogenes. 16 La
Sinjoro donu kompaton al la domo de Onesiforo; ĉar li
ofte min refreŝigis, kaj li ne hontis pri mia kateno, 17
sed kiam li estis en Romo, li elserĉis min tre diligente
kaj min trovis 18 (la Sinjoro donu al li, ke li trovu
kompaton ĉe la Sinjoro en tiu tago), kaj vi scias tre
bone, kiom da servoj li faris en Efeso.

2 Vi do, mia filo, fortikiĝu en la graco, kiu estas
en Kristo Jesuo. 2 Kaj kion vi de mi aŭdis inter
multaj atestantoj, tion transdonu al fidelaj homoj,
kompetentaj instrui ankaŭ aliajn. 3 Vi do elportu
suferojn, kiel bona militisto de Jesuo Kristo. 4 Neniu
militanto sin implikas en la aferojn de ĉi tiu vivo; por
ke li plaĉu al sia varbinto. 5 Kaj se iu konkuras kiel
atleto, li ne estas kronata, se li ne laŭregule konkuris.
6 La laboranta terkultivisto devas la unua partopreni
en la fruktoj. 7 Konsideru tion, kion mi diras; ĉar la
Sinjoro donos al vi komprenon pri ĉio. 8 Memoru
Jesuon Kriston, levitan el la mortintoj, el la idaro de
David, laŭ mia evangelio; 9 en ĝi mi elportas suferadon
ĝis ligiloj, kiel krimulo, sed la vorto de Dio ne estas
ligita. 10 Tial mi suferas ĉion pro la elektitoj, por ke
ili ankaŭ atingu la en Kristo Jesuo savon kun gloro
eterna. (aiōnios g166) 11 Fidinda estas la diro: Ĉar se ni
mortis kun li, ni ankaŭ vivos kun li; 12 se ni suferas, ni
ankaŭ reĝos kun li; se ni malkonfesos lin, li ankaŭ nin
malkonfesos; 13 se ni malfidas, li restas fidela; ĉar li ne
povas malkonfesi sin mem. 14 Memorigu ilin pri tio,
admonante ilin antaŭ la Sinjoro, ke ili ne vortobatalu,
kio estas neniel utila, kun risko de ŝancelo por la
aŭdantoj. 15 Klopodu prezenti vin ĉe Dio kiel aprobita,
laboranto senriproĉa, ĝuste pritaksante la vorton
de la vero. 16 Sed evitu profanajn babiladojn; ĉar
ili iros antaŭen al pli multe da malpieco, 17 kaj ilia
parolo dismordos kiel gangreno; el kiuj estas Himeneo
kaj Fileto, 18 kiuj pri la vero eraris, dirante, ke la
releviĝo estas jam pasinta; kaj ili renversas la fidon de
kelkaj. 19 Tamen la firma fundamento de Dio staras,
havante la jenan sigelon: La Sinjoro konas tiujn, kiuj
estas liaj, kaj: Foriru de maljusteco ĉiu, kiu nomas la
nomon de la Sinjoro. 20 Sed en granda domo estas
vazoj ne nur oraj kaj arĝentaj, sed ankaŭ lignaj kaj
argilaj, kaj unuj por honoro kaj aliaj por malhonoro.
21 Se do iu purigos sin de ĉi tiuj, li estos vazo por
honoro, sanktigita, taŭga por la mastro, pretigita por
ĉiu bona laboro. 22 Sed forkuru de junulaj voluptoj,
kaj sekvu justecon, fidon, amon, pacon, kune kun tiuj,
kiuj vokas la Sinjoron el pura koro. 23 Sed malsaĝajn
kaj neklerajn demandojn evitu, sciante, ke ili naskas
malpacojn. 24 Kaj la servisto de la Sinjoro devas ne
malpaci, sed esti afabla al ĉiuj, instruema, tolerema,
25 en humileco instruante tiujn, kiuj kontraŭstaras;
eble Dio donos al ili penton, por ke ili venu al scio de
la vero, 26 kaj por ke ili sobraj eliĝu el la kaptilo de la
diablo, kaptite de li, por plenumi lian volon.

3 Sed sciu, ke en la lastaj tagoj venos danĝeraj
tempoj. 2 Ĉar homoj estos sinamantaj, monamantaj,
fanfaronemaj, arogantaj, insultemaj, malobeemaj

al gepatroj, sendankaj, nesanktaj, 3 neparencamaj,
nepacigeblaj, kalumniemaj, nesinregantaj, malmildaj,
ne bonamantaj, 4 perfidemaj, pasiemaj, ventoplenaj,
plezuron amantaj pli ol Dion; 5 havante ŝajnon de
pieco, sed neinte ĝian potencon; de ĉi tiuj ankaŭ vin
forturnu. 6 Ĉar el ĉi tiuj estas tiuj, kiuj rampas en
domojn, kaj forkaptas malsaĝajn virinojn, ŝarĝitajn de
pekoj, forkondukatajn per diversaj voluptoj, 7 ĉiam
lernantajn, kaj neniam kapablajn veni al la scio de
la vero. 8 Kaj kiel Janes kaj Jambres kontraŭstaris
al Moseo, tiel same ĉi tiuj ankaŭ kontraŭstaras al
la vero, homoj kun malnobligita spirito, por la fido
senvaloraj. 9 Sed ili ne plu iros antaŭen; ĉar ilia
malsaĝeco evidentiĝos al ĉiuj, kiel ankaŭ fariĝis ĉe
tiuj. 10 Sed vi sekvis mian instruon, konduton, celon,
fidon, toleremecon, amon, paciencon, 11 persekutojn,
suferojn, kiaj okazis al mi en Antioĥia, en Ikonio, en
Listra; kiajn persekutojn mi suferis; kaj el ĉio tio la
Sinjoro min savis. 12 Jes, kaj ĉiuj, kiuj volas vivi pie
en Kristo Jesuo, estos persekutataj. 13 Sed malbonaj
homoj kaj ruzuloj ĉiam iros antaŭen al pli granda
malbono, trompantaj kaj trompataj. 14 Sed restu vi en
tio, kion vi lernis kaj pri kio vi certiĝis, sciante, de kiu
vi ĝin lernis, 15 kaj ke jam de frua infaneco vi konas la
sanktajn skribojn, kiuj povas fari vin saĝa por savo
per la fido, kiu estas en Kristo Jesuo. 16 Ĉiu skribaĵo
inspirita de Dio estas ankaŭ utila por instruo, por
admono, por korekto, por disciplino en justeco; 17
por ke la homo de Dio estu perfekta, plene provizita
por ĉiu bona laboro.

4 Mi ordonas al vi antaŭ Dio, kaj antaŭ Kristo Jesuo,
kiu juĝos la vivantojn kaj la mortintojn, kaj pro
lia apero kaj lia regno; 2 prediku la vorton; insistu
ĝustatempe, malĝustatempe; konvinku, admonu,
konsilu, en ĉia pacienco kaj instruado. 3 Ĉar venos
tempo, kiam oni ne toleros la sanan instruon; sed
havante jukantajn orelojn, amasigos al si instruantojn,
laŭ siaj deziroj; 4 kaj ili deturnos de la vero sian
orelon, kaj turnos sin flanken al fabeloj. 5 Sed vi estu
sobra en ĉio, elportu suferojn, faru la laboron de
evangeliisto, plenumu vian servadon. 6 Ĉar mi jam
estas elverŝata kvazaŭ verŝofero, kaj venis la horo de
mia foriro. 7 Mi batalis la bonan batalon, mi finis la
kuradon, mi gardis la fidon; 8 de nun estas konservita
por mi la krono de justeco, kiun la Sinjoro, la justa
juĝisto, donos al mi en tiu tago; kaj ne nur al mi,
sed ankaŭ al ĉiuj, kiuj amis lian aperon. 9 Klopodu
veni baldaŭ al mi; 10 ĉar Demas min forlasis, amante
la nunan mondon, kaj iris al Tesaloniko; Kreskens
al Galatujo, Tito al Dalmatujo. (aiōn g165) 11 Nur Luko
estas kun mi. Prenu Markon kaj alkonduku lin kun
vi, ĉar li utilas al mi por la servado. 12 Sed Tiĥikon
mi sendis al Efeso. 13 La mantelon, kiun mi lasis en
Troas ĉe Karpo, alportu, kiam vi venos, kaj la librojn,
precipe la pergamenojn. 14 Aleksandro, la kupristo,
faris al mi multe da malbono; la Sinjoro redonos al li
laŭ liaj faroj; 15 kontraŭ li vi ankaŭ vin gardu, ĉar li
multege kontraŭstaris al niaj vortoj. 16 Ĉe mia unua
pledo, neniu staris kun mi, sed ĉiuj min forlasis; tio
ne estu kalkulita kontraŭ ili. 17 Sed la Sinjoro staris
apud mi, kaj min fortigis, por ke per mi la anonco
estu plene publikigita, kaj ke ĉiuj nacianoj aŭdu; kaj
mi forsaviĝis el la buŝo de la leono. 18 La Sinjoro min
savos de ĉiu malbona faro, kaj min savkondukos en
sian ĉielan regnon; al li la gloro por ĉiam kaj eterne.
Amen. (aiōn g165) 19 Salutu Priskilan kaj Akvilan kaj la
domon de Onesiforo. 20 Erasto restis en Korinto; sed
Trofimon mi lasis malsanan en Mileto. 21 Klopodu
veni antaŭ la vintro. Salutas vin Eŭbulo kaj Pudens
kaj Lino kaj Klaŭdia kaj ĉiuj fratoj. 22 La Sinjoro estu
kun via spirito. Graco estu kun vi.

# Tito

1 Paŭlo, servisto de Dio kaj apostolo de Jesuo Kristo,
laŭ la fido de la elektitoj de Dio, kaj laŭ la scio de la
vero, kiu estas laŭ pieco, 2 kun espero al eterna vivo,
kiun la senmensoga Dio promesis antaŭ la tempoj
eternaj, (aiōnios g166) 3 sed ĝustatempe Li elmontris
Sian vorton en la anonco, kiu estas al mi konfidita
konforme al la ordono de Dio, nia Savanto; 4 al Tito,
mia vera filo laŭ komuna fido: Graco kaj paco de Dio,
la Patro, kaj de Kristo Jesuo, nia Savanto. 5 Pro tio mi
lasis vin en Kreto, ke vi aranĝu la aferojn mankohavajn
kaj starigu presbiterojn en ĉiu urbo, kiel mi ordonis al
vi; 6 se iu troviĝas neriproĉebla, edzo de unu edzino,
kies infanoj estas kredantoj, kaj ne estas akuzitaj pri
diboĉo, nek ribelemaj. 7 Ĉar episkopo devas esti sen
riproĉo, kiel administranto de Dio; ne obstina, ne
kolerema, ne drinkema, ne malpacema, ne avidanta
malhonoran gajnon; 8 sed gastama, bonamanta, sobra,
justa, sankta, sinreganta, 9 tenanta la fidelan vorton,
kiu estas laŭ la instruado, por ke li povu admoni pri la
sana doktrino kaj ankaŭ refuti la kontraŭdirantojn. 10
Ĉar ekzistas multaj homoj ribelemaj, vantaj parolantoj
kaj trompistoj, precipe tiuj el la cirkumcido, 11 kies
buŝoj devas esti fermitaj; homoj, kiuj renversas tutajn
domojn, instruantaj nekonvenaĵojn por malhonora
gajno. 12 Unu el ili, profeto samnacia, diris: La
Kretanoj ĉiam estas mensogantoj, malbonaj bestoj,
mallaboremaj manĝeguloj. 13 Tiu atesto estas vera.
Tial akre riproĉu ilin, por ke ili estu sanaj en la fido,
14 ne atentante Judajn fabelojn, kaj ordonojn de tiuj
homoj, kiuj deturnas sin de la vero. 15 Ĉe la puraj,
ĉio estas pura; sed ĉe la malpuraj kaj nekredantaj,
nenio estas pura; sed ilia menso kaj ilia konscienco
estas malpurigitaj. 16 Ili pretendas koni Dion; sed per
siaj agoj ili malkonfesas Lin, estante abomenaj kaj
malobeemaj kaj por ĉiu bona faro senvaloraj.

2 Sed parolu vi tion, kio konvenas al la sana doktrino:
2 ke la maljunuloj estu sobraj, seriozmienaj,
prudentaj, sanaj en la fido, en amo en pacienco; 3 ke la
maljunulinoj tiel same estu je sintenado respektemaj,
ne kalumniantoj, nek sklavigitaj de troa vino, sed
instruantaj la bonon; 4 por ke ili eduku la junulinojn
ami siajn edzojn, ami siajn infanojn, 5 esti prudentaj,
ĉastaj, hejme laborantaj, bonfaremaj, submetiĝemaj
al siaj propraj edzoj, por ke la vorto de Dio ne estu
blasfemita; 6 konsilu tiel same la junulojn, ke ili
estu prudentaj; 7 pri ĉio montrante vin ekzemplo de
bonaj faroj, en via instruado montrante sincerecon,
seriozecon, 8 paroladon sanan, nekondamneblan; por
ke la kontraŭulo hontu, havante nenion malbonan
diri kontraŭ ni. 9 Admonu sklavojn, ke ili estu
submetiĝemaj al siaj propraj sinjoroj kaj plaĉantaj
al ili en ĉio; ne kontraŭdiremaj, 10 ne ŝtelantaj, sed
montrantaj ĉian bonan fidelecon; por ke ili ornamu
en ĉio la doktrinon de Dio, nia Savanto. 11 Ĉar jam
aperis la graco de Dio, portante savon al ĉiuj homoj, 12
instruante nin, ke foriginte malpiecon kaj laŭmondajn
dezirojn, ni vivadu sobre, juste, kaj pie en la nuna
mondo, (aiōn g165) 13 atendantaj la feliĉan esperon kaj
la malkaŝon de la gloro de nia granda Dio kaj Savanto,
Jesuo Kristo, 14 kiu donis sin por ni, por elaĉeti nin el
ĉia maljusteco kaj por purigi al si popolon propran,
fervoran pri bonaj faroj. 15 Tion parolu, kaj konsilu
kaj riproĉu kun ĉia aŭtoritato. Neniu vin malestimu.

3 Memorigu ilin, ke ili submetiĝu al regantoj kaj
estroj, ke ili estu obeemaj, pretaj por ĉiu bona
laboro, 2 ke ili ne parolu malbonon pri iu ajn, estu
ne malpacemaj, sed dolĉanimaj, montrantaj ĉian
mildecon al ĉiuj homoj. 3 Ĉar ni ankaŭ estis iam
malsaĝaj, malobeemaj, trompitaj, servantaj al diversaj
pasioj kaj voluptoj, vivantaj en malico kaj envio,
malamindaj, kaj malamantaj unu la alian. 4 Sed kiam
aperis la boneco de Dio, nia Savanto, kaj Lia amo al
homoj, 5 ne per laboroj faritaj en justeco, kiujn ni
mem farus, sed laŭ Sia kompato Li savis nin, per la
lavado de renasko, kaj per la renovigo de la Sankta
Spirito, 6 kiun Li riĉe surverŝis sur nin per Jesuo
Kristo, nia Savanto; 7 por ke ni, justigite per Lia graco,
fariĝu heredantoj laŭ la espero de eterna vivo. (aiōnios
g166) 8 Fidinda estas la diro, kaj mi volas, ke pri tio
vi atestadu kun certeco, por ke tiuj, kiuj ekkredis al
Dio, zorgu pri bonaj faroj. Tiuj aferoj estas bonaj kaj
utilaj al la homoj; 9 sed evitu malsaĝajn demandojn
kaj genealogiojn kaj diskutojn kaj prileĝajn disputojn,
ĉar ili montriĝas senutilaj kaj vanaj. 10 Se iu estas
herezulo ankoraŭ post unua admono kaj dua, evitu
tiun, 11 sciante, ke tia homo perversiĝis kaj pekas,
estante memkondamnita. 12 Kiam mi sendos al vi
Artemason aŭ Tiĥikon, rapidu veni al mi al Nikopolis;
ĉar mi decidis travintri tie. 13 Antaŭen irigu Zenason,
la leĝiston, kaj Apoloson sur ilia vojaĝo kiel eble plej

rapide, por ke nenio manku al ili. 14 Kaj niaj amikoj
ankaŭ lernu daŭrigi bonajn laborojn, por necesaj
bezonoj, por ke ili ne estu senfruktaj. 15 Ĉiuj, kiuj
estas ĉe mi, vin salutas. Salutu vi tiujn, kiuj amas nin
en la fido. Graco estu kun vi ĉiuj.

# Filemon

1 Paŭlo, malliberulo por Kristo Jesuo, kaj Timoteo, la
frato, al Filemon, nia amato kaj kunlaboranto, 2 kaj
al Apfia, la fratino, kaj al Arĥipo, nia kunbatalanto,
kaj al la eklezio en via domo: 3 Graco al vi kaj paco
de Dio, nia Patro, kaj de la Sinjoro Jesuo Kristo. 4 Mi
ĉiam dankas mian Dion, memorigante pri vi en miaj
preĝoj, 5 aŭdinte pri via amo kaj pri la fido, kiun vi
havas al la Sinjoro Jesuo kaj al ĉiuj sanktuloj; 6 por
ke la partoprenado en via fido fariĝu energia per la
sciigo de ĉiu bonaĵo, kiu estas en vi, por Kristo. 7 Ĉar
mi tre ĝojis kaj havis multon da konsolo pro via amo,
ĉar la koroj de la sanktuloj refreŝiĝis per vi, frato mia.
8 Kvankam do mi havas plenan kuraĝon en Kristo,
por ordoni al vi tion, kio estas konvena, 9 tamen pro
la amo mi preferas petegi tia, kia mi estas, Paŭlo,
maljunulo kaj nun ankaŭ malliberulo pro Kristo Jesuo;
10 mi petegas vin koncerne mian filon, kiun mi naskis
en miaj katenoj; tio estis Onesimo, 11 kiu estis iam
senutila por vi, sed nun estas utila por vi kaj por
mi; 12 mi ĵus resendis al vi lin mem, alivorte, mian
propran koron; 13 lin mi volonte ja tenus apud mi,
por ke anstataŭ vi li estu al mi helpanto en la ligiloj
de la evangelio; 14 sed mi nenion volis fari sen via
konsento; por ke via boneco estu ne kvazaŭ deviga,
sed laŭvola. 15 Ĉar eble li pro tio estas apartigita for
de vi por kelka tempo, por ke vi havu lin por ĉiam;
(aiōnios g166) 16 jam ne kiel sklavon, sed kiel pli bonan
ol sklavo, kiel fraton amatan, precipe por mi, sed des
pli por vi, kaj en la karno kaj en la Sinjoro. 17 Se vi do
rigardas min kiel kunulon, akceptu lin tiel same, kiel
min mem. 18 Se tamen li faris ian malhonestaĵon, aŭ
ŝuldas ion al vi, tion enkalkulu en mian konton; 19 mi,
Paŭlo, skribas per mia propra mano, mi ĝin repagos;
mi tamen ne diras al vi, ke vi viaparte ŝuldas al mi eĉ
vin mem. 20 Jes, frato mia, lasu min havi plezuron
de vi en la Sinjoro; refreŝigu mian koron en Kristo.
21 Fidante pri via obeo, mi skribas al vi, sciante, ke
vi faros eĉ pli multe, ol kiom mi diras. 22 Sed krom
tio pretigu por mi gastoĉambron; ĉar mi esperas,
ke mi, laŭ viaj preĝoj, estos donita al vi. 23 Salutas
vin Epafras, mia kunmalliberulo en Kristo Jesuo, 24
Marko, Aristarĥo, Demas, Luko, miaj kunlaborantoj.
25 La graco de nia Sinjoro Jesuo Kristo estu kun via
spirito. Amen.

# Hebroj

**1** Dio, kiu multafoje kaj multamaniere parolis en la
tempo antikva al niaj patroj en la profetoj, 2 en
tiuj lastaj tagoj parolis al ni en Filo, kiun Li nomis
heredanto de ĉio, per kiu ankaŭ Li faris la mondaĝojn,
(aiōn g165) 3 kiu, estante la elbrilo de Lia gloro kaj
plena bildo de Lia substanco, kaj subtenante ĉion per
la vorto de sia potenco, kaj farinte la elpurigon de
niaj pekoj, sidiĝis dekstre de la Majesto en altaĵoj;
4 fariĝinte tiom pli granda ol la anĝeloj, kiom pli
bonegan nomon ol ili li heredis. 5 Ĉar al kiu el la
anĝeloj Li iam diris: Vi estas Mia Filo, Hodiaŭ Mi
vin naskis? kaj denove: Mi estos al li Patro, Kaj li
estos al Mi Filo? 6 Kaj ankoraŭ, kiam Li enkondukas
la unuenaskiton en la mondon, Li diras: Kaj kliniĝu
antaŭ li ĉiuj anĝeloj de Dio. 7 Kaj pri la anĝeloj Li
diras: Kiu faras la ventojn Liaj senditoj, Flamantan
fajron Liaj servantoj; 8 sed pri la Filo: Via trono estas
Dia trono por ĉiam kaj eterne; La sceptro de via regno
estas sceptro de justeco. (aiōn g165) 9 Vi amas virton
kaj malamas malvirton; Tial Dio, via Dio, oleis vin
per oleo de ĝojo pli ol viajn kamaradojn. 10 Kaj: En
antikveco Vi, ho Eternulo, fondis la teron, Kaj la
ĉielo estas la faro de Viaj manoj. 11 Ili pereos, sed Vi
restos; Kaj ĉiuj ili eluziĝos kiel vesto, 12 Kiel veston
Vi ilin ŝanĝos, kaj ili ŝanĝiĝos. Sed Vi restas la sama,
Kaj Viaj jaroj ne finiĝos. 13 Sed al kiu el la anĝeloj
Li iam diris: Sidu dekstre de Mi, Ĝis Mi faros viajn
malamikojn benketo por viaj piedoj? 14 Ĉu ne estas ili
ĉiuj spiritoj servantaj, elsendataj, por servi al tiuj, kiuj
estas heredontoj de la savo?

**2** Pro tio ni devas pli diligente atenti la aŭditaĵojn,
por ke ni de ili ne forflosu. 2 Ĉar se la vorto parolata
per anĝeloj montriĝis konstanta, kaj ĉiu dekliniĝo kaj
malobeo ricevis justan rekompencon, 3 kiamaniere ni
forsaviĝos, malŝatinte tian gravan savon? kiu, unue
ekanoncite per la Sinjoro, estas konfirmita al ni de
la aŭdintoj; 4 dum Dio ankaŭ kunatestis per signoj
kaj mirindaĵoj kaj diversaj potencaĵoj kaj disdonoj de
la Sankta Spirito, laŭ Sia volo. 5 Ĉar ne al anĝeloj Li
submetis la estontan mondon, pri kiu ni paroladas.
6 Sed iu atestis ie, dirante: Kio estas homo, ke Vi
lin memoras? Kio estas homido, ke Vi pensas pri li?
7 Vi malaltigis lin malmulte antaŭ la anĝeloj, Per
honoro kaj beleco Vi lin kronis. Vi faris lin reganto
super la faritaĵoj de Viaj manoj; 8 Ĉion Vi metis sub
liajn piedojn. Ĉar, metante ĉion sub lin, Li nenion
lasis ne submetita. Sed nun ni ankoraŭ ne vidas
ĉion submetita sub lin. 9 Sed la malmulte sub la
anĝeloj malaltigitan Jesuon ni vidas, pro la sufero
de morto, kronita per honoro kaj beleco, por ke per
la favoro de Dio li gustumu morton por ĉiu. 10 Ĉar
konvenis al Li, por kiu ĉio estas, kaj de kiu ĉio estas,
alkondukanta multajn filojn al gloro, perfektigi per
suferado la estron de ilia savo. 11 Ĉar la sanktiganto
kaj la sanktigatoj estas ĉiuj el unu; pro tiu kaŭzo li ne
hontas nomi ilin fratoj, 12 dirante: Mi predikos Vian
nomon al miaj fratoj, En la mezo de popola kunveno
mi Vin gloros. 13 Kaj ankaŭ: Mi fidos Lin. Kaj ankaŭ:
Jen mi kaj la infanoj, kiujn Dio donis al mi. 14 Ĉar do
la infanoj partoprenas en sango kaj karno, li ankaŭ
mem egale partoprenis en ili, por ke per morto li
neniigu tiun, kiu havis la potencon de morto, tio estas
la diablo, 15 kaj liberigu tiujn, kiuj per timo de morto
dum la tuta vivo estis subigitaj al sklaveco. 16 Ĉar vere
li ektenas ne anĝelojn, sed la idaron de Abraham li
ektenas. 17 Tial li devis en ĉio similiĝi al siaj fratoj,
por ke li fariĝu kompatema kaj fidela ĉefpastro en la
aferoj de Dio, por fari repacigon por la pekoj de la
popolo. 18 Ĉar per tio, ke li mem, tentate, suferis, li
povas helpi la tentatojn.

**3** Tial, fratoj sanktaj, partoprenantaj en ĉiela voko,
pripensu la Apostolon kaj Ĉefpastron de nia
konfeso, Jesuon, 2 kiu estis fidela al Tiu, kiu nomis
lin kiel ankaŭ Moseo en Lia domo. 3 Ĉar ĉi tiu estas
rigardita kiel inda je tiom pli granda gloro ol Moseo,
kiom pli grandan honoron, ol la domo, havas ĝia
stariginto. 4 Ĉar ĉiu domo estas starigita de iu; sed
la stariginto de ĉio estas Dio. 5 Kaj Moseo ja estis
fidela en Lia tuta domo, kiel servanto, por atestaĵo pri
tio, kio estis parolota; 6 sed Kristo, kiel filo super Lia
domo; kies domo ni estas, se ni tenos nian kuraĝon
kaj la ĝojadon de nia espero firmaj ĝis la fino. 7 Tial,
kiel diras la Sankta Spirito: Hodiaŭ, se vi aŭskultas
Lian voĉon, 8 Ne obstinigu vian koron, kiel en la
indignigo, Kiel en la tago de la tento en la dezerto, 9
Kiam viaj patroj Min incitis, Esploris kaj vidis Miajn
farojn kvardek jarojn. 10 Pro tio Mi indignis kontraŭ
tiu generacio, Kaj Mi diris: Ili ĉiam estas kun koro
malĝusta, Kaj ili ne volas koni Miajn vojojn; 11 Tial
Mi ĵuris en Mia kolero, Ke ili ne venos en Mian

ripozejon. 12 Gardu vin, fratoj, ke ne estu en iu el vi
koro malbona de nekredemo, en defalo de la vivanta
Dio; 13 sed konsilu unu la alian ĉiutage, dum estas
nomate hodiaŭ, por ke neniu el vi estu obstinigita per
la trompeco de peko; 14 ĉar ni fariĝis partoprenantoj
en Kristo, se la komencon de nia certiĝo ni tenos
firma ĝis la fino; 15 dum estas dirite: Hodiaŭ, se vi
aŭskultas Lian voĉon, Ne obstinigu vian koron, kiel
en la indignigo. 16 Ĉar kiuj, aŭskultinte, indignigis?
ĉu ne ĉiuj elirintoj el Egiptujo per Moseo? 17 Kaj
kontraŭ kiuj Li indignis kvardek jarojn? ĉu ne kontraŭ
la pekintoj, kies korpoj falis en la dezerto? 18 Kaj al
kiuj Li ĵuris, ke ili ne venos en Lian ripozejon, krom al
la neobeantoj? 19 Kaj ni vidas, ke ili pro nekredemo
ne povis enveni.

4 Ni do timu, ke, kiam al ni restas promeso veni
en Lian ripozejon, iu el vi eble ŝajne malatingos
ĝin. 2 Ĉar al ni ankaŭ estas evangelio anoncita tiel
same, kiel al ili; sed al ili la aŭdita parolo ne utilis, ne
miksite kun fido ĉe la aŭdantoj. 3 Ĉar ni ekkredintoj
venas en la ripozejon, kiel Li diris: Tial Mi ĵuris en Mia
kolero, Ke ili ne venos en Mian ripozejon; kvankam la
faritaĵoj estis finitaj jam de post la fondo de la mondo.
4 Ĉar Li diris ie pri la sepa tago jene: Kaj Dio ripozis en
la sepa tago de Sia tuta laboro; 5 kaj ankaŭ jene: Ili
ne venos en Mian ripozejon. 6 Ĉar restas do por iuj
veni en ĝin, kaj tiuj, al kiuj la evangelio unue estis
predikita, ne envenis pro malobeo, 7 denove Li difinis
iun tagon, dirante en David: Hodiaŭ, post tiom da
tempo; kiel estas dirite: Hodiaŭ, se vi aŭskultas Lian
voĉon, Ne obstinigu vian koron. 8 Ĉar se Josuo al ili
estus doninta ripozon, Li ne parolus poste pri alia
tago. 9 Tial restas sabata ripozo por la popolo de Dio.
10 Ĉar tiu, kiu venis en sian ripozejon, ankaŭ mem
ripozas de siaj faroj, kiel Dio de Siaj. 11 Ni klopodu do
veni en tiun ripozejon, por ke neniu falu laŭ la sama
ekzemplo de malobeo. 12 Ĉar la vorto de Dio estas
viva kaj energia, kaj pli akra ol ĉia glavo dutranĉa,
kaj penetranta ĝis divido de la animo kaj spirito, kaj
de artikoj kaj medolo, kaj kritikanta la pensojn kaj
celojn de la koro. 13 Kaj ne ekzistas kreitaĵo kaŝita
antaŭ Lia vidado; sed ĉio estas nuda kaj evidenta al la
okuloj de Tiu, al kiu nia afero rilatas. 14 Havante do
ĉefpastron grandan, trapasintan la ĉielon, Jesuon, la
Filon de Dio, ni tenu firme nian konfeson. 15 Ĉar ni
havas ĉefpastron ne tian, kiu ne povus simpatii kun
niaj malfortaĵoj, sed tentitan en ĉio tiel same, tamen
sen peko. 16 Ni do alvenu kun kuraĝo al la trono de
graco, por ke ni ricevu kompaton kaj trovu gracon
por ĝustatempa helpo.

5 Ĉar ĉiu ĉefpastro, prenata el inter homoj, pro homoj
estas difinita por aferoj rilatantaj al Dio, por ke li
oferu kaj donacojn kaj oferojn pro pekoj; 2 povante
indulgi tiujn, kiuj estas malkleraj kaj erarantaj, tial, ke
li mem estas ĉirkaŭata de malforteco; 3 kaj pro tio li
devas, kiel por la popolo, tiel ankaŭ por si mem, oferi
pro pekoj. 4 Kaj neniu alprenas al si tiun honoron
krom la vokato de Dio, tiel same, kiel Aaron. 5 Tiel
ankaŭ Kristo sin mem ne honoris, por fariĝi ĉefpastro,
sed lin honoris Tiu, kiu diris al li: Vi estas Mia Filo,
Hodiaŭ Mi vin naskis; 6 kiel ankaŭ aliloke Li diris: Vi
estas pastro por ĉiam, Laŭ la maniero de Melkicedek.
(aiōn g165) 7 En siaj karnaj tagoj, preĝojn kaj petegojn
oferinte, kun forta kriado kaj larmoj, al Tiu, kiu povis
lin savi el morto, kaj aŭdite pro sia pia timo, 8 tiu,
kvankam li estis Filo, tamen lernis obeon per tio, kion
li suferis; 9 kaj perfektigite, li fariĝis la fonto de eterna
savo al ĉiuj al li obeantaj; (aiōnios g166) 10 nomite de Dio
ĉefpastro laŭ la maniero de Melkicedek. 11 Pri tiu ni
havas dirotaĵojn multajn, kaj malfacile klarigeblajn
tial, ke vi surdiĝis en aŭdado. 12 Ĉar kvankam vi jam
devus esti instruistoj, vi ankoraŭ bezonas, ke oni
instruu al vi, kiaj estas la komencaj elementoj de la
orakoloj de Dio, kaj vi fariĝis bezonantoj de lakto kaj
ne de solida nutraĵo. 13 Ĉar ĉiu, kiu nutriĝas per lakto,
estas nesperta rilate la vorton de justeco; ĉar li estas
infaneto. 14 Sed solida nutraĵo estas por la plenaĝuloj,
kiuj per uzado havas la sentojn ekzercitaj, por distingi
inter bono kaj malbono.

6 Tial, ĉesigante la diskutadon pri la elementoj de
Kristo, ni iru antaŭen al perfektiĝo, ne metante
denove fundamenton de pento el malvivaj faroj kaj de
fido al Dio, 2 de la dogmaro pri baptoj, surmetado
de manoj, de revivigo de mortintoj, de eterna juĝo.
(aiōnios g166) 3 Kaj tion ni faros, se Dio permesos. 4
Ĉar ĉe tiuj, kiuj unufoje estas allumitaj kaj gustumis
la ĉielan donon kaj fariĝis partoprenantoj en la
Sankta Spirito, 5 kaj gustumis la bonan vorton de
Dio kaj la potencojn de la estonta mondo, (aiōn g165)
6 kaj defalis, ne estas eble renovigi ilin ankoraŭ al
pento, dum ili rekrucumas al si la Filon de Dio kaj
elmetas lin al publika malhonoro. 7 Ĉar la tero,

kiu entrinkis la pluvon, sur ĝin ofte venantan, kaj
produktas kreskaĵojn, taŭgajn por tiuj, pro kiuj ĝi
ankaŭ estas kultivata, ricevas benon de Dio; 8 sed se
ĝi donas dornojn kaj kardojn, ĝi estas malaprobata
kaj proksima al malbeno; ĝia fino estas en brulado. 9
Sed ni certigas al ni aferojn pli bonajn pri vi, amatoj,
kaj aferojn, kiuj akompanas savon, kvankam ni tiel
parolas; 10 ĉar Dio ne estas maljusta, por forgesi vian
laboron kaj la amon, kiun vi montris al Lia nomo,
servinte al la sanktuloj kaj ankoraŭ servante. 11 Sed ni
deziras, ke ĉiu el vi montru tian saman diligentecon
por la plenumo de la espero ĝis la fino; 12 por ke vi
fariĝu ne maldiligentaj, sed imitantoj de tiuj, kiuj per
fido kaj pacienco heredas la promesojn. 13 Ĉar kiam
Dio promesis al Abraham, Li ĵuris per Si mem (ĉar
Li ne povis ĵuri per iu pli granda), 14 dirante: Certe
benante Mi benos vin, kaj multigante Mi multigos
vin. 15 Kaj tiel, atendinte kun pacienco, li atingis la
promeson. 16 Ĉar homoj ĵuras per la pli granda, kaj ĉe
ili la ĵuro por certigo estas fino de ĉia disputado. 17 Kaj
Dio, volante montri pli abunde al la heredantoj de la
promeso la neŝanĝeblecon de Sia intenco, intermetis
ĵuron, 18 por ke per du neŝanĝeblaj aferoj, en kiuj ne
eble estas por Dio mensogi, fortan konsolon havu ni,
kiuj rifuĝis, por akiri la esperon antaŭ ni metitan,
19 kiun ni havas kiel ankron de la animo, firman kaj
konstantan, enirantan internen de la kurteno; 20 kien
eniris Jesuo, la antaŭulo por ni, fariĝinte ĉefpastro
por ĉiam laŭ la maniero de Melkicedek. (aiōn g165)

**7** Ĉar tiu Melkicedek, reĝo de Salem, pastro de Dio la
Plejalta, kiu renkontis Abrahamon revenantan de la
mortigado de la reĝoj, kaj lin benis, 2 kaj al kiu ankaŭ
Abraham donis dekonon el ĉio (unue laŭ interpreto
reĝo de justeco, kaj poste reĝo de Salem, tio estas
reĝo de paco; 3 senpatra, senpatrina, sengenealogia,
havanta nek komencon de tagoj, nek finon de vivo,
sed similigita al la Filo de Dio), restas pastro por
ĉiam. 4 Nun pripensu, kiel granda estis ĉi tiu, al kiu la
patriarko Abraham donis dekonon el la akiraĵoj. 5 Kaj
efektive el la filoj de Levi tiuj, kiuj ricevas la pastran
oficon, havas ordonon imposti laŭleĝe podekone la
popolon, tio estas, siajn fratojn, kvankam elirintajn
el la lumboj de Abraham; 6 sed tiu, kies genealogio
ne estas el ili, ricevis de Abraham dekonaĵon, kaj
benis tiun, kiu havis la promesojn. 7 Sed ekster ĉia
kontraŭparolo, la malpli granda ricevas benon de la
pli granda. 8 Kaj ĉi tie homoj, kiuj mortas, ricevas
dekonaĵojn, sed tie unu, pri kiu estas atestate, ke li
vivas. 9 Kaj, por tiel diri, per Abraham ankaŭ Levi, la
ricevanto de dekonaĵoj, donis dekonaĵon; 10 ĉar li estis
ankoraŭ en la lumboj de la patro, kiam Melkicedek
lin renkontis. 11 Tial, se ekzistis perfekteco per la
Levida pastreco (ĉar sub ĝi la popolo ricevis la leĝon),
kia plua bezono estis, ke leviĝu alia pastro laŭ la
maniero de Melkicedek, kaj ne estu nomata laŭ la
maniero de Aaron? 12 Ĉar kiam la pastraro ŝanĝiĝas,
necese ankaŭ fariĝas ŝanĝo de leĝo. 13 Ĉar tiu, pri
kiu tio estas dirita, estas ano de alia tribo, el kiu
neniu servis ĉe la altaro. 14 Ĉar evidente estas, ke nia
Sinjoro devenis de Jehuda, pri kiu tribo Moseo diris
nenion rilate pastrecon. 15 Kaj tio eĉ pli evidenta
estas, se laŭ simileco de Melkicedek leviĝas pastro
alia, 16 kiu estas farita ne laŭ la leĝo de ordono
karna, sed laŭ la potenco de vivo nedetruebla; 17 ĉar
li havas la ateston: Vi estas pastro por ĉiam Laŭ la
maniero de Melkicedek. (aiōn g165) 18 Ĉar okazas vere
nuligado de antaŭiranta ordono, pro ĝia malforteco
kaj senutileco 19 (ĉar la leĝo nenion perfektigis); kaj
okazas la enkonduko de pli bona espero, per kiu ni
alproksimiĝas al Dio. 20 Kaj pro tio, ke ne mankas
ĵurado 21 (ĉar ili sen ĵurado estas faritaj pastroj, sed ĉi
tiu kun ĵuro laŭ Tiu, kiu diris pri li: La Eternulo ĵuris,
kaj ne pentos: Vi estas pastro por ĉiam); (aiōn g165) 22
Jesuo fariĝis garantiulo de des pli bona interligo. 23
Kaj ili ja fariĝis pastroj multenombraj, ĉar pro morto
estas malpermesate al ili daŭri; 24 sed ĉi tiu, pro sia
eterna daŭrado, havas sian pastrecon neŝanĝebla. (aiōn
g165) 25 Tial ankaŭ li povas savi ĝis la ekstremaĵo tiujn,
kiuj alproksimiĝas per li al Dio, ĉar li ĉiam vivas, por
propeti pro ili. 26 Ĉar por ni konvenis tia ĉefpastro,
sankta, senpeka, senmakula, apartigita for de pekuloj,
kaj farita pli alta ol la ĉielo; 27 li ne havas ĉiutagan
necesecon, kiel tiuj ĉefpastroj, oferi oferojn, unue
pro la propraj pekoj, poste pro la pekoj de la popolo;
ĉar tion li faris unufoje por ĉiam, oferante sin mem.
28 Ĉar la leĝo starigas kiel ĉefpastrojn homojn, kiuj
havas malfortecon; sed la vorto de la ĵuro, kiu estas
post la leĝo, nomas Filon, perfektigitan por ĉiam. (aiōn
g165)

**8** Jen do la resumo rilate la diritaĵojn: Ni havas tian
ĉefpastron, kiu sidiĝis dekstre de la trono de la
Majesto en la ĉielo, 2 servanto de la sanktejo, kaj

de la vera tabernaklo, kiun starigis ne homo, sed la
Sinjoro. 3 Ĉar ĉiu ĉefpastro estas enoficigita por oferi
donacojn kaj oferojn; kaj tial estas necese, ke ankaŭ ĉi
tiu havu ion por oferi. 4 Sed se li estus sur la tero, li
tute ne estus pastro, tial, ke jam ekzistas oferantoj
de donacoj laŭ la leĝo; 5 kiuj servas al la ekzemplo
kaj ombro de ĉielaj aferoj, kiel Moseo estis admonita,
faronte la tabernaklon; ĉar: Zorgu, Li diris, ke vi faru
ĉion laŭ la modelo, kiu estis montrita al vi sur la
monto. 6 Sed nun li ricevis servadon des pli bonan,
ju pli bona estas la interligo, kies interulo li fariĝis
kaj kiu sur pli bonaj promesoj estas dekretita. 7 Ĉar
se tiu unua interligo estus sendifekta, tiam ne estus
serĉita loko por dua. 8 Ĉar riproĉante ilin, Li diris: Jen
venos la tempo, diras la Eternulo, Kiam Mi faros kun
la domo de Izrael kaj la domo de Jehuda interligon
novan: 9 Ne tian, kiel la interligo, kiun Mi faris kun
iliaj patroj En la tago, kiam Mi prenis ilian manon, por
elkonduki ilin el la lando Egipta, Ĉar ili ne restis en
Mia interligo, Kaj Mi malatentis ilin, diris la Eternulo.
10 Sed jen estas la interligo, kiun Mi faros kun la domo
de Izrael Post tiu tempo, diras la Eternulo: Mi metos
Miajn leĝojn en ilian internon, Kaj sur ilia koro Mi ilin
skribos, Kaj Mi estos ilia Dio, Kaj ili estos Mia popolo.
11 Kaj ne plu instruos ĉiu sian proksimulon, Kaj ĉiu
sian fraton, dirante: Ekkonu la Eternulon; Ĉar ĉiuj
Min konos, De iliaj malgranduloj ĝis iliaj granduloj;
12 Ĉar Mi pardonos iliajn kulpojn, Kaj iliajn pekojn
kaj malbonaĵojn Mi ne plu rememoros. 13 Dirante:
Novan interligon — Li malnovigis la unuan. Kaj tio, kio
kadukiĝas kaj malnoviĝas estas proksima al malapero.

9 Sed eĉ la unua interligo havis ordonojn pri
Diservado, kaj sanktejon mondan. 2 Ĉar tabernaklo
estis pretigita: la unua, en kiu estis la kandelabro kaj
la tablo kaj la panoj de propono; ĝi estas nomata la
Sanktejo; 3 kaj post la dua kurteno, la tabernaklo
nomata la Plejsanktejo, 4 havanta la oran incensilon,
kaj la keston de interligo, tegitan entute per oro, en kiu
estis vazo ora (enhavanta la manaon) kaj la ekflorinta
bastono de Aaron kaj la tabeloj de la interligo, 5
kaj super tio kerubojn de gloro superombrantajn
la fermoplaton, pri kiuj ni nun ne povas detale
paroli. 6 Kiam do ĉi tio estis tiel aranĝita, en la
unuan tabernaklon eniras ĉiam la pastroj, farante la
Diservojn; 7 sed en la duan, unufoje en la jaro eniras
la ĉefpastro sola, ne sen sango, kiun li oferas pro si
kaj pro la eraroj de la popolo; 8 per tio la Sankta
Spirito montras, ke la vojo en la sanktejon ankoraŭ ne
estas elmontrita, dum la unua tabernaklo ankoraŭ
staras; 9 kio estas parabolo por la nuna tempo; laŭ kio
estas oferataj donacoj kaj oferoj, kiuj ne povas laŭ la
konscienco perfektigi la adoranton, 10 nur altrudate
(kun manĝaĵoj kaj trinkaĵoj kaj diversaj lavadoj kaj
karnaj purigadoj) ĝis tempo de reformo. 11 Sed Kristo,
aperinte kiel ĉefpastro de la estontaj bonoj, per la
pli granda kaj pli perfekta tabernaklo, ne manfarita,
tio estas ne el ĉi tiu kreo, 12 nek per la sango de
kaproj kaj bovidoj, sed per sia propra sango, eniris
unufoje por ĉiam en la sanktejon, atinginte eternan
elaĉeton. (aiōnios g166) 13 Ĉar se la sango de kaproj
kaj bovoj, kaj la cindro de bovidino, ŝprucigite sur
malpurulojn, sanktigas ĝis la purigado de la karno: 14
kiom pli la sango de Kristo, kiu per la eterna Spirito
sin oferis senmakula al Dio, purigos vian konsciencon
el malvivaj faroj, por servi al la vivanta Dio? (aiōnios
g166) 15 Kaj pro tio li estas interulo de nova testamento,
por ke (post kiam morto okazis por la elaĉeto de tiuj
pekoj, kiuj estis sub la unua testamento) la vokitoj
ricevu la promeson de la eterna heredaĵo. (aiōnios
g166) 16 Ĉar kiam estas testamento, nepre devas esti
la morto de la testamentinto. 17 Ĉar testamento
efektiviĝas rilate mortinton, ĉar ĝi neniam efikas,
dum vivas la testamentinto. 18 Tial ankaŭ la unua
testamento ne sen sango dediĉiĝis. 19 Ĉar Moseo,
parolinte ĉiun ordonon laŭ la leĝo al la tuta popolo,
prenis la sangon de bovidoj kaj kaproj, kun akvo kaj
lano skarlata kaj hisopo, kaj aspergis la libron mem
kaj la tutan popolon, 20 dirante: Jen estas la sango de
la interligo, kiun Dio ordonis al vi. 21 Plue li aspergis
per la sango la tabernaklon kaj ĉiujn vazojn de la
Diservo. 22 Kaj laŭ la leĝo, preskaŭ ĉio puriĝas per
sango; kaj sen sangoverŝado ne fariĝas absolvo. 23
Necese do estis, ke la ekzemploj de la enĉielaj aferoj
estu purigitaj per ĉi tiuj, sed la enĉielaj aferoj mem
per pli bonaj oferoj, ol ĉi tiuj. 24 Ĉar eniris Kristo ne
en sanktejon manfaritan, ekzemplon de la vera; sed
en la ĉielon mem, por aperi antaŭ la vizaĝo de Dio
por ni; 25 nek estas necese, ke li oferu sin ofte, kiel la
ĉefpastro eniras en la sanktejon jaron post jaro, kun
sango ne propra; 26 alie li devus ofte suferi de post la
fondo de la mondo; sed nun unufoje en la fino de la
mondaĝoj li aperis, por forigi la pekon per la ofero de
si mem. (aiōn g165) 27 Kaj kiel estas dekretite por homoj

unufoje morti, kaj post tio juĝo; 28 tiel ankaŭ Kristo,
oferite unufoje, por porti la pekojn de multaj, aperos
duan fojon, aparte de peko, al tiuj, kiuj lin atendas,
por savo.

**10** Ĉar la leĝo, havante ombron de estontaj bonaĵoj,
ne la bildon mem de la aferoj, neniam povas,
per tiuj samaj oferoj, kiujn oni oferadas senĉese jaron
post jaro, perfektigi la tien venantajn. 2 Ĉar alie ĉu ili
ne ĉesus esti oferataj? tial, ke la adorantoj, unufoje
purigite, jam ne havus konsciencon pri pekoj. 3 Sed
en tiuj oferoj estas ĉiujara rememorigo pri pekoj. 4
Ĉar ne eble estas, ke la sango de bovoj kaj kaproj
forprenus pekojn. 5 Tial, venante en la mondon, li
diris: Oferojn kaj donacojn Vi ne deziras, Sed korpon
Vi preparis por mi; 6 Bruloferojn kaj pekoferojn Vi ne
ŝatis. 7 Tiam mi diris: Jen mi venis (En la rulaĵo de la
libro estas skribite pri mi), Por plenumi Vian volon,
ho Dio! 8 Antaŭe dirinte: Oferojn kaj donacojn kaj
bruloferojn kaj pekoferojn Vi nek deziris nek ŝatis
(kiuj estas oferataj laŭ la leĝo), 9 tiam li diris: Jen mi
venis, por plenumi Vian volon. Li forprenas la unuan,
por ke li starigu la duan. 10 Laŭ tiu volo ni estas
sanktigitaj per la ofero de la korpo de Jesuo Kristo
unufoje por ĉiam. 11 Kaj ĉiu pastro staradas ĉiutage,
servante kaj oferante ofte la samajn oferojn, kiuj
neniam povas forpreni pekojn; 12 sed li, oferinte unu
oferon por pekoj por ĉiam, sidiĝis dekstre de Dio; 13
de nun atendante, ĝis liaj malamikoj fariĝos benketo
por liaj piedoj. 14 Ĉar per unu ofero li perfektigis ĝis
eterneco la sanktigatojn. 15 Kaj la Sankta Spirito ankaŭ
atestas al ni; ĉar, dirinte: 16 Jen estas la interligo,
kiun Mi faros kun ili Post tiu tempo, diras la Eternulo:
Mi metos Miajn leĝojn en ilian internon, Kaj sur
ilia koro Mi ilin skribos; li ankaŭ diras: 17 Kaj iliajn
pekojn kaj malbonaĵojn Mi ne plu rememoros. 18
Sed kie estas absolvo de ĉi tiuj, ne plu estas oferado
pro peko. 19 Havante do, fratoj, kuraĝon eniri en la
plejsanktejon per la sango de Jesuo, 20 per la vojo
nova kaj vivanta, kiun li dediĉis por ni, tra la kurteno,
tio estas, lia karno, 21 kaj havante grandan pastron
super la domo de Dio, 22 ni alproksimiĝu kun sincera
koro, en pleneco de fido, kun niaj koroj aspergitaj for
de malbona konscienco, kaj kun la korpoj lavitaj per
akvo pura; 23 ni tenu firme la konfeson de nia espero
sendekliniĝe; ĉar la promesinto estas fidela; 24 kaj ni
pripensu unu la alian, por instigi al amo kaj bonaj
faroj; 25 ne forlasante nian kunvenadon, kiel estas la
kutimo de iuj; sed konsilante unu la alian, kaj des pli
forte, ju pli vi vidas la tagon alproksimiĝanta. 26 Ĉar
se, ricevinte la scion de la vero, ni pekos memvole,
jam ne restas ofero pro pekoj, 27 sed ia timoplena
atendo de juĝo, kaj de fajra kolero, kiu ekstermos la
kontraŭulojn. 28 Tiu, kiu malŝatis la leĝon de Moseo,
sen kompato mortas ĉe du aŭ tri atestantoj; 29 kiom
pli severan punon, vi opinias, ke meritos tiu, kiu
piedpremis la Filon de Dio kaj rigardas kiel ne sanktan
la sangon de la interligo, per kiu li estis sanktigita, kaj
kiu spitis la Spiriton de graco? 30 Ĉar ni konas Tiun,
kiu diris: Ĉe Mi estas venĝo, Mi repagos. Kaj ankaŭ:
La Eternulo juĝos Sian popolon. 31 Terure estas fali
en la manojn de la vivanta Dio. 32 Sed memoru la
antaŭajn tagojn, en kiuj vi, jam allumite, elportis
grandan konflikton de suferoj; 33 unuflanke, kiam vi
fariĝis spektaklo per riproĉoj kaj doloroj, kaj aliflanke,
kiam vi partoprenis kun tiuj, kiuj tian sperton havis.
34 Ĉar vi kompatis tiujn, kiuj estis en katenoj, kaj ĝoje
akceptis la rabadon de via posedaĵo, sciante, ke vi
mem havas pli bonan kaj restantan posedaĵon. 35
Tial ne forĵetu vian kuraĝon, kiu havas rekompencon
grandan. 36 Ĉar vi havas bezonon de pacienco, por ke,
plenuminte la volon de Dio, vi ricevu la promeson. 37
Ĉar ankoraŭ iomete da tempo, La venonto venos, kaj
ne malfruos. 38 Sed virtulo vivos per sia fideleco; Kaj
se li sin tiros malantaŭen, mia spirito ne ĝojos en li. 39
Sed ni ne estas el la malantaŭen tiriĝantaj en pereon,
sed el la kredantaj por la gajnado de la animo.

**11** Kaj la fido estas realigo de esperataĵoj, provado
de aferoj ne vidataj. 2 Ĉar per tio la antikvuloj
ricevis bonan ateston. 3 Per la fido ni komprenas, ke
la mondaĝoj estas kreitaj per vorto de Dio, tiel ke tio,
kio estas vidata, ne estas farita el aperantaĵoj. **(aiōn g165)**
4 Per la fido Habel oferis al Dio pli bonan oferon ol
Kain, per kio li ricevis ateston, ke li estas justa, ĉar Dio
atestis pri liaj donacoj; kaj per ĝi li, mortinte, ankoraŭ
parolas. 5 Per la fido Ĥanoĥ estis transportita, por
ne vidi morton; kaj li ne estis trovata, ĉar Dio lin
transportis; ĉar antaŭ lia transporto estis atestite
pri li, ke li plaĉis al Dio; 6 kaj sen fido neeble estas
plaĉi al Li; ĉar necese estas, ke tiu, kiu alvenas al Dio,
kredu, ke Li ekzistas, kaj ke Li fariĝas rekompencanto
al tiuj, kiuj Lin diligente serĉas. 7 Per la fido Noa,
avertite pri la ankoraŭ ne viditaj aferoj, kun pia timo

konstruis arkeon por la savado de sia domo; per kio
li kondamnis la mondon, kaj fariĝis heredanto de la
justeco laŭ fido. 8 Per la fido Abraham, vokite, obeis
eliri en lokon, kiun li estis ricevonta kiel heredaĵon;
kaj li eliris, ne sciante, kien li iras. 9 Per la fido li
fariĝis pasloĝanto en la lando de la promeso, kiel
lando fremda, loĝante en tendoj kun Isaak kaj Jakob,
kunheredantoj de la sama promeso; 10 ĉar li serĉis la
urbon havantan la fundamentojn, kies arĥitekturisto
kaj konstruanto estas Dio. 11 Per la fido ankaŭ Sara
mem ricevis kapablon gravediĝi, eĉ post la ordinara
aĝo, ĉar ŝi kredis la Promesinton fidela; 12 sekve ankaŭ
el unu, kaj tiu kvazaŭ malviva, leviĝis tiel multaj,
kiel la steloj de la ĉielo laŭnombre, kaj kiel la sablo,
kiu estas sur la bordo de la maro, nekalkulebla. 13
Ĉiuj tiuj mortis en fido, ne ricevinte la promesojn,
sed vidinte kaj salutinte ilin de malproksime, kaj
konfesinte, ke ili estas fremduloj kaj migrantoj sur la
tero. 14 Ĉar tiuj, kiuj parolas tiamaniere, konstatas,
ke patrolandon ili serĉas. 15 Kaj se ili tenadus en
memoro tiun landon, el kiu ili eliris, ili havus ian
okazon por reiri. 16 Sed nun pli bonan landon ili
celas, tio estas, ĉielan; tial Dio ne hontas pri ili, esti
nomata ilia Dio; ĉar Li por ili pretigis urbon. 17 Per
la fido Abraham, provate, oferis Isaakon; tiu, kiu
akceptis la promesojn, ekoferis ja sian solenaskiton;
18 nome tiu, al kiu estis dirite: Per Isaak oni nomos
vian idaron; 19 pensante, ke Dio povas relevi lin eĉ el
la mortintoj; el kie ankaŭ li en similaĵo lin retrovis. 20
Per la fido Isaak benis Jakobon kaj Esavon pri estontaj
aferoj. 21 Per la fido Jakob, mortante, benis ĉiun el
la filoj de Jozef, kaj adorkliniĝis sur la supro de sia
bastono. 22 Per la fido Jozef, ĉe la fino de sia vivo,
aludis la foriron de la Izraelidoj, kaj pri siaj ostoj
ordonis. 23 Per la fido Moseo, naskiĝinte, estis kaŝata
tri monatojn de la gepatroj, ĉar ili vidis la infaneton
belega, kaj ne timis la dekreton de la reĝo. 24 Per la
fido Moseo, plenkreskinte, rifuzis esti nomata filo
de filino de Faraono, 25 plivole elektante kunsuferi
kun la popolo de Dio, ol havi la kelktempan ĝuadon
de peko, 26 taksante la riproĉon de Kristo pligranda
riĉeco ol la trezoroj Egiptaj, ĉar li rigardis al la estonta
rekompenco. 27 Per la fido li forlasis Egiptujon, ne
timante la koleregon de la reĝo; ĉar li persistis, kiel
vidante Tiun, kiu ne estas videbla. 28 Per la fido li
observis la Paskon kaj la sangaspergon, por ke la
ekstermanto de la unuenaskitoj ne tuŝu ilin. 29 Per
la fido li trapasis la Ruĝan Maron kvazaŭ sekteron,
kion fari penante, la Egiptoj dronis. 30 Per la fido
la muroj de Jeriĥo falis, ĉirkaŭirite sep tagojn. 31
Per la fido la malĉastistino Raĥab ne pereis kun la
nekredantoj, akceptinte la spionojn kun paco. 32
Kaj kion mi diru plu? ĉar mankus al mi tempo por
rakonti pri Gideon kaj Barak kaj Ŝimŝon kaj Jiftaĥ
kaj David kaj Samuel kaj la profetoj; 33 kiuj pere
de fido venkis regnojn, plenumis justecon, atingis
promesojn, fermis la buŝojn de leonoj, 34 estingis
la forton de fajro, forsaviĝis de la tranĉrando de
glavo, el malforteco refortiĝis, fariĝis potencaj en
militado, forkurigis armeojn de fremduloj. 35 Virinoj
rericevis siajn mortintojn per revivigo; kaj aliaj suferis
turmentadon, ne akceptante liberigon, por atingi pli
bonan releviĝon; 36 kaj aliaj elproviĝis per mokado
kaj skurĝado kaj ankaŭ de katenoj kaj malliberiĝo;
37 ili estis ŝtonmortigataj, dissegataj, tentataj; per
glavo ili estis mortigitaj; ili ĉirkaŭvagis en ŝafaj kaj
kapraj feloj, senigite, subpremate, dolorigate 38 (je
kiuj la mondo ne estis inda); ili vagadis en dezertoj,
sur montoj, en kavernoj kaj kaŝejoj de la tero. 39
Kaj ĉiuj tiuj, ricevinte bonan ateston per sia fido, ne
ricevis la promeson, 40 ĉar Dio antaŭvidis por ni ion
pli bonan, por ke ili sen ni ne estu perfektigataj.

12 Tial ankaŭ ni, havante ĉirkaŭ ni tian nubegon
da atestantoj, formetu ĉion pezan kaj la pekon
embarasantan, kaj persiste kuru la kuradon antaŭ
ni metitan, 2 direktante la rigardon al la aŭtoro kaj
perfektiganto de la fido, Jesuo, kiu, pro la ĝojo antaŭ
li metita, suferis la krucon, malestimante honton, kaj
sidiĝis dekstre de la trono de Dio. 3 Ĉar pripensu tiun,
kiu suferis tian kontraŭdiradon de pekuloj kontraŭ li,
por ke vi ne laciĝu kaj ne malfortiĝu en viaj spiritoj.
4 Vi ankoraŭ ne kontraŭstaris ĝis sango, batalante
kontraŭ peko; 5 kaj vi forgesis la admonon, kiu rezonas
kun vi, kiel kun filoj: Mia filo, ne malŝatu la punon de
la Eternulo, Nek svenu, riproĉate de Li; 6 Ĉar kiun la
Eternulo amas, tiun Li punkorektas, Kaj Li skurĝas
ĉiun filon, kiun Li akceptas. 7 Se vi suferas punon,
kiel al filoj Dio rilatiĝas al vi; ĉar kia filo estas, kiun la
patro ne punas? 8 Sed se vi estas sen puno, en kiu ĉiuj
fariĝas partoprenantoj, tiuokaze vi estas bastardoj,
kaj ne filoj. 9 Cetere ni havis patrojn de nia karno,
kiuj nin punis, kaj ni respektis ilin; ĉu ni ne multe pli
submetiĝu al la Patro de la spiritoj, kaj vivu? 10 Ĉar

ili ja dum kelke da tagoj laŭ sia volo punis; sed Li,
por utilo, por ke ni partoprenu en Lia sankteco. 11
Ĉiu puno portempe ŝajnas esti ne ĝoja, sed malĝoja;
sed poste ĝi donas la pacplenan frukton de justeco
al tiuj, kiuj per ĝi estas ekzercitaj. 12 Tial levu la
manojn pendantajn kaj la senfortajn genuojn; 13 kaj
faru rektajn vojetojn por viaj piedoj, por ke tio, kio
estas lama, ne deturniĝu, sed prefere resaniĝu. 14
Serĉu pacon kun ĉiuj, kaj la sanktigon, sen kiu neniu
vidos la Sinjoron; 15 rigardante zorge, por ke neniu
maltrafu la gracon de Dio, por ke nenia radiko de
maldolĉeco, altkreskante, vin ĝenu, kaj por ke per tio
multaj ne malpuriĝu; 16 por ke ne estu iu malĉastulo
aŭ malpiulo, kiel Esav, kiu por unu manĝo vendis
sian unuenaskitecon. 17 Ĉar vi scias, ke eĉ kiam li
poste deziris heredi la benon, li estis rifuzita; ĉar por
pentado li trovis nenian lokon, kvankam kun larmoj
li ĝin serĉis. 18 Ĉar vi ne alvenis al monto tuŝebla
kaj brulanta per fajro, kaj al nigreco kaj mallumo
kaj ventego, 19 kaj sono de trumpeto kaj voĉo de
paroloj, kies aŭdantoj petegis, ke plua vorto ne estu
parolata al ili, 20 ĉar ili ne povis elporti la ordonon:
Se eĉ bruto tuŝos la monton, ĝi estu ŝtonmortigita;
21 kaj tiel terura estis la aperaĵo, ke Moseo diris: Mi
timegas kaj tremas; 22 sed vi alvenis al la monto Cion
kaj al la urbo de vivanta Dio, la ĉiela Jerusalem, kaj
al miriadoj da anĝeloj, 23 al la ĝenerala kunveno kaj
eklezio de la unuenaskitoj, en la ĉielo enskribitaj, kaj
al Dio, la Juĝisto de ĉiuj, kaj al la spiritoj de justuloj
perfektigitaj, 24 kaj al Jesuo, la interulo de nova
interligo, kaj al la sango de aspergo, kiu parolas pli
bonajn aferojn ol la sango de Habel. 25 Gardu vin,
ke vi ne forrifuzu la parolanton. Ĉar se ne forsaviĝis
tiuj, kiuj forrifuzis la admonanton sur la tero, des
malpli ni, deturnante nin de la parolanto el la ĉielo,
26 kies voĉo tiam skuis la teron; sed nun Li promesis,
dirante: Ankoraŭ unufoje Mi ekmovos ne sole la teron,
sed ankaŭ la ĉielon. 27 Kaj tiu diro: Ankoraŭ unufoje
— montras la translokigon de la skuitaĵoj, kiel de
faritaĵoj, por ke la neskueblaj restu. 28 Tial, ricevante
regnon neskueblan, ni havu dankemecon, per kiu ni
adoru Dion akcepteble kun respektego kaj pia timo;
29 ĉar nia Dio estas fajro konsumanta.

**13** La fratamo daŭradu. 2 Ne forgesu gastamon al
nekonatoj; ĉar per tio iuj gastigis anĝelojn, ne
sciante. 3 Memoru la katenitojn, kvazaŭ vi ankaŭ
estus katenitaj, kaj la suferantojn, ĉar vi ankaŭ estas
en la korpo. 4 Estu honorata la edzeco ĉe ĉiuj, kaj la
lito estu senmakula; ĉar malĉastulojn kaj adultulojn
Dio juĝos. 5 Estu via karaktero sen monamo; estu
kontentaj je tio, kion vi havas; ĉar Li mem diris: Mi ne
foriros de vi kaj ne forlasos vin. 6 Tial ni kuraĝas diri:
La Eternulo estas mia helpanto, mi ne timos; Kion
faros al mi homo? 7 Memoru viajn regintojn, kiuj
parolis al vi la vorton de Dio; kaj ilian fidon imitu,
pripensante la finon de ilia vivmaniero. 8 Jesuo Kristo
estas la sama hieraŭ, hodiaŭ, kaj ĝis eterneco. (aiōn g165)
9 Ne forportiĝu per dogmaroj diversaj kaj fremdaj; ĉar
estas bone, ke la koro estu plifortigata per graco, ne
per manĝaĵoj, per kiuj ne profitis la okupiĝantaj pri ili.
10 Ni havas altaron, el kiu la servantoj de la tabernaklo
havas nenian rajton manĝi. 11 Ĉar la korpoj de tiuj
bestoj, kies sango estas en la sanktejon enportata de la
ĉefpastro pro peko, estas bruligataj ekster la tendaro.
12 Tial Jesuo ankaŭ, por ke li sanktigu la popolon per
sia propra sango, ekster la pordego suferis. 13 Tial ni
eliru al li ekster la tendaro, portante lian riproĉon. 14
Ĉar ĉi tie ni ne havas restantan urbon, sed estontan
ni serĉas. 15 Per li do ni oferu al Dio ĉiam oferon de
laŭdo, tio estas, la frukton de niaj lipoj konfesantaj
al lia nomo. 16 Sed ne forgesu la bonfaradon kaj
kunulecon; ĉar tiaj oferoj plaĉas al Dio. 17 Obeu al tiuj,
kiuj vin regas, kaj submetiĝu; ĉar ili viglas pro viaj
animoj, kvazaŭ liveronte raporton; por ke kun ĝojo ili
faru tion, kaj ne ĝemante, ĉar ĉi tio estus senprofita
por vi. 18 Preĝu por ni; ĉar ni fidas, ke ni havas bonan
konsciencon, dezirante en ĉio honeste vivi. 19 Sed
des pli urĝe mi petegas vin fari tion, por ke mi tiom
pli frue estu redonata al vi. 20 Nun la Dio de paco,
kiu relevis el la mortintoj la grandan paŝtiston de la
ŝafoj, nian Sinjoron Jesuo, per la sango de la eterna
interligo, (aiōnios g166) 21 perfektigu vin en ĉia bona
laboro, por plenumi Lian volon, farante en vi tion, kio
plaĉas al Li, per Jesuo Kristo, al kiu estu la gloro por
ĉiam kaj eterne. Amen. (aiōn g165) 22 Kaj mi petegas vin,
fratoj, toleru la vorton de konsilo, ĉar mi skribis al vi
per malmulte da vortoj. 23 Sciu, ke estas liberigita
nia frato Timoteo, kun kiu, se li venos baldaŭ, mi
vin vidos. 24 Salutu ĉiujn, kiuj vin regas, kaj ĉiujn
sanktulojn. Tiuj, kiuj estas el Italujo, vin salutas. 25
Graco estu kun vi ĉiuj. Amen.

# Jakobo

1 Jakobo, servisto de Dio kaj de la Sinjoro Jesuo
Kristo, al la dek du triboj, kiuj estas dispelitaj:
Saluton! 2 Rigardu ĉion kiel ĝojigan, miaj fratoj, kiam
vi falas en diversajn tentojn, 3 sciante, ke la provado
de via fido faras paciencon. 4 Kaj la pacienco havu
sian perfektan faradon, por ke vi estu perfektaj kaj
kompletaj, ne havante mankon. 5 Sed se al iu el
vi mankas saĝeco, li petu Dion, kiu donacas al ĉiuj
malavare kaj ne riproĉas, kaj ĝi estos al li donata. 6
Sed li petu en fido, neniel dubante; ĉar la dubanto
similas ondon de la maro, ventopelatan kaj skuatan. 7
Ĉar tiu homo ne pensu, ke li ricevos ion de la Sinjoro
— 8 duoblanima homo, ŝanceliĝa en ĉiuj siaj vojoj.
9 Sed la malaltranga frato ĝoju pri sia alteco; 10 kaj
la riĉulo pri sia humiliĝo; ĉar kiel floro de herbo li
forpasos. 11 Ĉar la suno leviĝas kun la brulvento kaj
sekigas la herbon, kaj ĝia floro falas, kaj la gracio de
ĝia formo pereas; tiel ankaŭ la riĉulo velkos en siaj
vojoj. 12 Feliĉa estas la homo, kiu elportas tenton;
ĉar kiam li estos elprovita, li ricevos la kronon de
vivo, kiun la Sinjoro promesis al tiuj, kiuj lin amas.
13 Neniu diru, kiam li estas tentata: Mi estas tentata
de Dio; ĉar Dio ne estas tentebla de malbono, kaj Li
mem tentas neniun; 14 sed ĉiu estas tentata, kiam li
estas fortirata de sia dezirado, kaj delogata. 15 Tiam
la dezirado, gravediĝinte, naskas pekon; kaj la peko,
maturiĝinte, naskas morton. 16 Ne trompiĝu, miaj
amataj fratoj. 17 Ĉiu bona donaĵo kaj ĉiu perfekta
donaco estas de supre, malsuprenvenante de la Patro
de lumoj, ĉe kiu ne povas ekzisti ŝanĝo, nek ombro de
sinturnado. 18 Laŭ Sia propra volo Li naskis nin per la
vorto de la vero, por ke ni estu kvazaŭ unuaaĵo de Liaj
kreitaĵoj. 19 Tion vi scias, miaj amataj fratoj. Sed ĉiu
rapidu aŭdi, malrapidu paroli, malrapidu koleri; 20 ĉar
la kolero de homo ne efektivigas la justecon de Dio.
21 Tial, formetinte ĉian malpurecon kaj superfluon de
malico, akceptu kun humileco la enplantitan vorton,
kiu povas savi viajn animojn. 22 Sed estu plenumantoj
de la vorto, kaj ne nur aŭskultantoj, trompantaj vin
mem. 23 Ĉar se iu estas aŭskultanto de la vorto,
kaj ne plenumanto, li similas iun, kiu rigardas sian
naturan vizaĝon en spegulo; 24 ĉar li sin rigardas kaj
foriras, kaj tuj forgesas, kia li estis. 25 Sed tiu, kiu fikse
rigardas en la perfektan leĝon, la leĝon de libereco,
kaj tiel restas, ne estante aŭskultanto, kiu forgesas,
sed plenumanto, kiu energias, tiu estos benata en
sia faro. 26 Se iu ŝajnas al si religia, ne bridante sian
langon, sed trompante sian koron, ties religio estas
vanta. 27 Religio pura kaj senmakula antaŭ nia Dio
kaj Patro estas jena: viziti orfojn kaj vidvinojn en ilia
mizero, kaj sin gardi sen malpuriĝo de la mondo.

2 Miaj fratoj, ne kun personfavorado tenu la fidon
de nia Sinjoro Jesuo Kristo, la glora Sinjoro. 2 Ĉar
se en vian sinagogon envenas viro kun oraj ringoj,
en bela vestaro, kaj envenas ankaŭ malriĉulo en
malpura vestaro; 3 kaj vi respektas la bele vestitan
homon, kaj diras: Sidiĝu ĉi tie en bona loko; kaj diras
al la malriĉulo: Staru tie, aŭ sidiĝu sube apud mia
piedbenketo; 4 ĉu vi ne diferencigas en vi mem, kaj
fariĝas juĝistoj malbone pensantaj? 5 Aŭskultu, miaj
amataj fratoj; ĉu Dio ne elektis la malriĉulojn laŭ la
mondo, por esti riĉaj rilate al fido, kaj heredantoj de
la regno, kiun Li promesis al tiuj, kiuj Lin amas? 6 Sed
vi malhonoradis la malriĉulon. Ĉu ne subpremas vin
la riĉuloj, kaj mem trenas vin antaŭ la tribunalojn?
7 Ĉu ili ne blasfemas la honorindan nomon, sur vin
metitan? 8 Tamen, se vi plenumas la reĝan leĝon laŭ
la Skribo: Amu vian proksimulon kiel vin mem — vi
faras bone; 9 sed se vi favoras personojn, vi faras
pekon, kulpigitaj de la leĝo, kiel malobeintoj. 10 Ĉar
ĉiu, kiu observas la tutan leĝaron, sed falpuŝiĝas pri
unu punkto, fariĝis kulpa pri ĉio. 11 Ĉar Tiu, kiu diris:
Ne adultu — diris ankaŭ: Ne mortigu. Se do vi ne
adultas, sed mortigas, vi fariĝis malobeinto kontraŭ
la leĝo. 12 Tiel parolu, kaj tiel agu, kiel juĝotoj laŭ
leĝo de libereco. 13 Ĉar al tiu, kiu ne kompatis, la juĝo
estos senkompata; la kompato sin altigas super la
juĝo. 14 Kia estas la profito, miaj fratoj, se iu diras,
ke li havas fidon, sed ne havas farojn? ĉu tiu fido
povas lin savi? 15 Se frato aŭ fratino estas nuda kaj
sen ĉiutaga manĝo, 16 kaj iu el vi diras al ili: Iru en
paco, estu varmaj kaj sataj; tamen vi ne donas al ili
tion, kion la korpo bezonas, kia estas la profito? 17
Tiel same fido, ne havante farojn, estas en si mem
malviva. 18 Kaj cetere iu diros: Vi havas fidon, kaj mi
havas farojn; montru al mi vian fidon aparte de faroj,
kaj mi per miaj faroj montros al vi la fidon. 19 Vi ja
kredas, ke Dio estas unu; vi faras bone; la demonoj
ankaŭ kredas kaj tremas. 20 Se ĉu vi volas scii, ho
vantulo, ke la fido sen faroj estas senfrukta? 21 Ĉu nia
patro Abraham ne praviĝis per faroj, oferinte sian

filon Isaak sur la altaro? 22 Vi vidas, ke la fido kunagis
kun liaj faroj, kaj per faroj la fido perfektiĝis; 23 kaj
plenumiĝis la Skribo, kiu diras: Kaj Abraham kredis al
Dio, kaj tio estis kalkulita al li kiel virto; kaj li estis
nomita: amiko de Dio. 24 Vi vidas, ke homo praviĝas
per faroj, kaj ne sole per fido. 25 Tiel same, ĉu ankaŭ
la malĉastistino Raĥab ne praviĝis per faroj, kiam ŝi
akceptis la senditojn kaj forsendis ilin per alia vojo?
26 Ĉar kiel la korpo aparte de la spirito estas malviva,
tiel ankaŭ fido aparte de faroj estas malviva.

3 Ne estu multaj instruistoj, miaj fratoj, sciante, ke ni
ricevos pli severan juĝon. 2 Ĉar multokaze ni ĉiuj
falpuŝiĝas. Se iu ne falpuŝiĝas parole, tiu estas perfekta
homo, kapabla bridi ankaŭ la tutan korpon. 3 Se ni al
la ĉevaloj enmetas la bridojn en la buŝojn, por ke ili
obeu al ni, ni ankaŭ ĉirkaŭturnas ilian tutan korpon.
4 Jen ankaŭ la ŝipoj, kiuj, kvankam ili estas tiel grandaj
kaj estas kurepelataj de fortaj ventoj, tamen per tre
malgranda direktilo turniĝadas, kien ajn la volo de
la direktilisto decidas. 5 Tiel ankaŭ la lango estas
malgranda membro, kaj fanfaronas grandaĵojn. Jen,
kiel grandan arbaron ekbruligas fajrero! 6 Kaj la lango
estas fajro; mondo da maljusteco inter niaj membroj
estas la lango, kiu malpurigas la tutan korpon kaj
ekbruligas la radon de la naturo kaj estas ekbruligita
de Gehena. (Geenna g1067) 7 Ĉar ĉiun specon de bestoj kaj
birdoj, de rampaĵoj kaj enmaraĵoj la homa raso al si
subigas kaj subigis; 8 sed la langon neniu povas subigi;
ĝi estas malkvieta malbono, plena de mortiga veneno.
9 Per ĝi ni benas la Sinjoron kaj Patron; kaj per ĝi ni
malbenas homojn, faritajn laŭ la bildo de Dio; 10 el la
sama buŝo eliras beno kaj malbeno. Miaj fratoj, tio
devus ne tiel esti. 11 Ĉu la fonto elŝprucigas el la sama
aperturo dolĉan akvon kaj maldolĉan? 12 ĉu figarbo,
miaj fratoj, povas doni olivojn, aŭ vinberarbo figojn?
kaj sala akvo ne donas dolĉaĵon. 13 Kiu inter vi estas
saĝa kaj prudenta? tiu elmontru per honesta vivado
siajn farojn en mildeco de saĝeco. 14 Sed se vi havas
akran ĵaluzon kaj malpacon en via koro, ne fieru,
kaj ne mensogu kontraŭ la vero. 15 Ĉi tiu saĝeco ne
devenas de supre, sed estas monda, laŭsenta, demona.
16 Ĉar kie estas ĵaluzo kaj malpaco, tie estas konfuzo
kaj ĉia malnobla ago. 17 Sed la saĝeco, kiu estas de
supre, estas unue ĉasta, poste pacema, milda, cedema,
plena de kompatemo kaj bonaj fruktoj, sen partieco,
sen hipokriteco. 18 Kaj la frukto de justeco estas
semata en paco por tiuj, kiuj faras pacon.

4 De kie militoj kaj de kie bataloj inter vi? ĉu ne
de viaj voluptoj, militantaj en viaj membroj? 2
Vi deziras, kaj ne havas; vi mortigas kaj konkuras,
kaj ne povas akiri; vi batalas kaj militas; vi ne havas,
ĉar vi ne petas. 3 Vi petas kaj ne ricevas, tial, ke vi
petas malprave, por ke vi elspezu por viaj voluptoj.
4 Vi adultulinoj, ĉu vi ne scias, ke la amikeco al la
mondo estas malamikeco al Dio? Ĉiu do, kiu volas
esti amiko de la mondo, fariĝas malamiko de Dio. 5
Aŭ ĉu vi opinias, ke la Skribo vane parolas? Ĉu la
spirito, kiun Li loĝigis en ni, deziregas envieme? 6
Sed Li donas pli grandan gracon. Tial estas dirite:
Dio kontraŭstaras al la fieruloj, sed al la humiluloj
Li donas gracon. 7 Submetiĝu do al Dio; sed rezistu
la diablon, kaj li forkuros de vi. 8 Alproksimiĝu al
Dio, kaj Li alproksimiĝos al vi. Purigu la manojn, vi
pekuloj, kaj ĉastigu la korojn, vi duoblanimuloj. 9
Mizeru kaj malĝoju kaj ploru; via ridado turniĝu en
ploron, kaj via ĝojo en malĝojon. 10 Humiliĝu antaŭ
la Sinjoro, kaj Li vin altigos. 11 Ne kalumniu unu
la alian, fratoj. Kiu kalumnias fraton aŭ juĝas sian
fraton, tiu kalumnias la leĝon kaj juĝas la leĝon; sed
se vi juĝas la leĝon, vi jam estas ne plenumanto de
la leĝo, sed juĝanto. 12 Unu estas la leĝdonisto kaj
juĝisto, Tiu, kiu povas savi aŭ pereigi; kiu vi estas,
juĝanta vian proksimulon? 13 Atentu nun vi, kiuj
diras: Hodiaŭ aŭ morgaŭ ni iros al tiu urbo kaj restos
tie unu jaron kaj negocados kaj profitos; 14 kvankam
vi ne scias, kio morgaŭ okazos. Kio estas via vivo?
Vi ja estas vaporo, kiu mallongan tempon montriĝas
kaj poste malaperas. 15 Anstataŭ diri: Se la Sinjoro
volos, ni vivados kaj faros ĉi tion aŭ tion. 16 Sed nun
vi fieras pri viaj memfidaĵoj; ĉiu tia singratulado estas
malbona. 17 Kiu do scias bonfari, kaj ne bonfaras, ĉe
tiu estas peko.

5 Atentu nun, riĉuloj; ploregu kaj kriegu pro la
mizeroj sur vin alvenontaj. 2 Via riĉo putriĝis,
kaj viaj vestoj konsumiĝas de tineoj. 3 Via oro kaj
via arĝento rustiĝis; kaj ilia rusto atestos kontraŭ
vi, kaj konsumos vian karnon, kiel fajro. En la lastaj
tagoj vi kolektadis trezoron. 4 Jen krias la de vi
trompe retenata salajro de la laboristoj, kiuj falĉis
viajn kampojn; kaj la krioj de la rikoltintoj venis en
la orelojn de la Eternulo Cebaot. 5 Vi luksadis sur la

tero, kaj diboĉadis; vi nutradis viajn korojn en tago de
buĉado. 6 Vi kondamnis, vi mortigis la justulon; li
ne kontraŭstaras al vi. 7 Paciencu do, fratoj, ĝis la
alveno de la Sinjoro. Jen la terkultivisto atendas la
multevaloran frukton de la tero, paciencante pri ĝi,
ĝis ĝi ricevos la fruan kaj la malfruan pluvon. 8 Vi
ankaŭ paciencu; fortikigu viajn korojn; ĉar la alveno
de la Sinjoro alproksimiĝas. 9 Ne murmuru, fratoj,
unu kontraŭ la alia, por ke vi ne estu juĝataj; jen la
juĝisto staras antaŭ la pordoj. 10 Prenu, fratoj, kiel
ekzemplon de suferado kaj pacienco, la profetojn, kiuj
parolis en la nomo de la Sinjoro. 11 Jen ni nomas feliĉaj
tiujn, kiuj elportis suferon; vi aŭdis pri la pacienco
de Ijob, kaj vidis la finan agadon de la Sinjoro, ke la
Sinjoro estas kompatema kaj indulgema. 12 Sed antaŭ
ĉio, miaj fratoj, ne ĵuru, nek per la ĉielo, nek per la
tero, nek per ia alia ĵuro; sed via jes estu jes, kaj via
ne estu ne; por ke vi ne falu sub juĝon. 13 Ĉu iu el vi
suferas? li preĝu. Ĉu iu estas gaja? li psalme kantu. 14
Ĉu iu el vi malsanas? li venigu la presbiterojn de la
eklezio; kaj ili preĝu super li, ŝmirinte lin per oleo en
la nomo de la Sinjoro; 15 kaj la preĝo de fido savos la
malsanulon, kaj la Sinjoro relevos lin; kaj se li faris
pekojn, tio estos pardonita al li. 16 Konfesu do viajn
pekojn unu al la alia, kaj preĝu unu por la alia, por ke
vi resaniĝu. Petego de justulo multe efikas per sia
energio. 17 Elija estis homo samnatura, kiel ni, kaj li
preĝis fervore, ke ne pluvu; kaj ne pluvis sur la teron
dum tri jaroj kaj ses monatoj. 18 Kaj denove li preĝis;
kaj la ĉielo donis pluvon, kaj la tero ekproduktis sian
frukton. 19 Miaj fratoj, se iu el vi forvagos de la vero,
kaj iu lin returnos, 20 oni sciu, ke tiu, kiu returnas
pekulon de la elvoja forvago, savos animon el morto
kaj kovros amason da pekoj.

# 1 Petro

1 Petro, apostolo de Jesuo Kristo, al la elektitoj,
kiuj estas el la dispelitaro, pasloĝantaj en Ponto,
Galatujo, Kapadokio, Azio, kaj Bitinio, 2 laŭ la antaŭscio
de Dio, la Patro, en sanktigo de la Spirito, por obeo
kaj aspergo de la sango de Jesuo Kristo: Graco al vi kaj
paco pligrandiĝu. 3 Benata estu la Dio kaj Patro de nia
Sinjoro Jesuo Kristo, kiu laŭ Sia granda kompato nin
renaskis en esperon vivan per la releviĝo de Jesuo
Kristo el la mortintoj, 4 en heredaĵon ne pereontan,
ne makulotan, ne velkontan, rezervitan en la ĉielo
por vi, 5 kiuj estas gardataj de la potenco de Dio per
fido al savo preta malkaŝiĝi en la lasta tempo. 6 En
tio vi ĝojegas, kvankam por kelka tempo, se estas
necese, malĝojigite en diversaj tentoj, 7 por ke la
provado de via fido, pli multevalora ol oro, kiu pereas,
kvankam per fajro provite, troviĝu efika por laŭdo
kaj gloro kaj honoro en la malkaŝo de Jesuo Kristo;
8 kiun, ne vidinte, vi amas; kiun kvankam nun vi
ne vidas, tamen, al li kredante, vi ĝojegas per ĝojo
nedirebla kaj gloroplena; 9 ricevante la celon de via
fido, savon de animoj. 10 Koncerne tiun savon esploris
kaj serĉis la profetoj, kiuj profetis pri la graco venonta
al vi; 11 serĉante, kiun kaj kian tempon montris la
enestanta en ili Spirito de Kristo, kiu atestis antaŭe la
suferojn por Kristo kaj la sekvontajn glorojn. 12 Kaj al
ili malkaŝiĝis, ke ne al si mem, sed al vi, ili liveris tion,
kio nun estas proklamita al vi de tiuj, kiuj predikis al
vi la evangelion per la Spirito Sankta, elsendita el
la ĉielo; en kiujn aferojn anĝeloj deziras enrigardi.
13 Tial, ĉirkaŭzoninte la lumbojn de via menso, estu
sobraj kaj esperadu perfekte la gracon alportotan al vi
en la malkaŝo de Jesuo Kristo; 14 kiel infanoj de obeo,
ne formiĝante laŭ la voluptoj, kiujn vi antaŭe havis
en via nescio; 15 sed kiel via Vokinto estas sankta, tiel
vi ankaŭ fariĝu sanktaj en ĉia konduto; 16 pro tio, ke
estas skribite: Vi estu sanktaj, ĉar Mi estas sankta. 17
Kaj se vi vokas la Patron, kiu sen personfavorado juĝas
laŭ la faro de ĉiu, vi pasigu en timo la tempon de via
ĉi tiea loĝado; 18 sciante, ke ne per pereemaj objektoj,
oro aŭ arĝento, vi elaĉetiĝis el via vanta vivmaniero,
kiun vi ricevis de viaj patroj; 19 sed per multekosta
sango, kiel de ŝafido senmakula kaj sendifekta, la
sango de Kristo; 20 kiu estis antaŭdifinita antaŭ la
fondo de la mondo, sed elmontrita en la fino de la
tempoj pro vi, 21 kiuj per li fidas Dion, kiu relevis lin
el la mortintoj kaj donis al li gloron; por ke via fido
kaj espero estu al Dio. 22 Ĉastiginte viajn animojn,
en la obeo al la vero, por sincera amo al la frataro,
amu unu la alian el la koro fervore; 23 renaskite, ne el
pereema semo, sed el nepereema, per la vorto de Dio,
vivanta kaj restanta. (aiōn g165) 24 Ĉar: Ĉiu karno estas
herbo, Kaj ĉiu ĝia ĉarmo estas kiel kampa floreto.
Sekiĝas herbo, velkas floreto; 25 Sed la vorto de la
Eternulo restas eterne. Kaj ĉi tiu estas la parolo, kiu
estas predikita al vi. (aiōn g165)

2 Formetinte do ĉian malbonon kaj ĉian trompon kaj
hipokritecon kaj enviojn kaj ĉiajn kalumniojn, 2
kiel ĵusnaskitaj suĉinfanoj, sopiru al la spirita lakto
pura, por ke vi per tio kresku en savon, 3 se vi
gustumis, ke la Sinjoro estas bona; 4 al kiu alvenante,
kvazaŭ al ŝtono vivanta, de homoj rifuzita, sed ĉe Dio
elektita, honorinda, 5 vi ankaŭ, kiel ŝtonoj vivantaj,
konstruiĝas domo spirita, sankta pastraro, por oferi
spiritajn oferojn, akcepteblajn de Dio per Jesuo Kristo.
6 Ĉar estas enhavate en skribo: Jen Mi kuŝigas en Cion
bazangulan ŝtonon, elektitan, valoregan; Kaj kiu lin
fidas, tiu ne estos hontigita. 7 Por vi do, la fidantoj,
estas la valoregeco; sed por nefidantoj: Ŝtono, kiun
malŝatis la konstruantoj, Fariĝis ŝtono bazangula;
8 kaj: Ŝtono de falpuŝiĝo kaj roko de alfrapiĝo; ili
falpuŝiĝas pro la vorto, malobeante, por kio ankaŭ ili
estas difinitaj. 9 Sed vi estas raso elektita, pastraro
reĝa, nacio sankta, popolo Diposedata, por ke vi
proklamu la gloron de Tiu, kiu vokis vin el mallumo en
Sian lumon mirindan; 10 kiuj iam estis ne-popolo, sed
nun estas popolo de Dio; antaŭe nekompatitoj, sed nun
kompatitoj. 11 Amataj, mi petegas vin kiel fremdulojn
kaj migrantojn, detenu vin de karnaj voluptoj, kiuj
militadas kontraŭ la animo; 12 kondutante dece ĉe
la nacianoj, por ke, kvankam ili kalumnias vin kiel
malbonagulojn, tamen, vidante viajn bonfarojn, ili
gloru Dion en la tago de vizitado. 13 Submetu vin al
ĉiu homa institucio pro la Sinjoro; ĉu al la reĝo, la
superreganto; 14 ĉu al regantoj, kiel liaj senditoj por
venĝo al malbonaguloj kaj por laŭdo al bonaguloj. 15
Ĉar la volo de Dio estas, ke bonfarante, vi silentigu
la nesciadon de homoj malsaĝaj; 16 kiel liberaj, kaj
ne farantaj el via libereco kovrilon de malico, sed
kiel servistoj de Dio. 17 Ĉiujn honoru. La frataron
amu. Dion timu. La reĝon honoru. 18 Servantoj,
submetu vin al viaj sinjoroj kun ĉia timo; ne sole al la

bonaj kaj malseveraj, sed ankaŭ al la malbonhumoraj.
19 Ĉar tio estas laŭdinda, se pro konscienco al Dio
oni elportas malĝojon, suferante maljuste. 20 Ĉar
kia honoro estas, se, pekante kaj sekve batate, vi
tion pacience elportas? sed se, bonfarante kaj sekve
suferante, vi tion pacience elportas, tio estas laŭdinda
antaŭ Dio. 21 Ĉar al ĉi tio vi estas vokitaj; pro tio,
ke Kristo ankaŭ suferis pro vi, postlasante por vi
ekzemplon, por ke vi sekvu liajn postesignojn; 22
pekon li ne faris, kaj trompo ne troviĝis en lia buŝo;
23 insultate, li ne insultis responde; suferante, li ne
minacis, sed submetis sin al la juste juĝanta; 24 li mem
portis niajn pekojn en sia korpo sur la lignaĵo, por
ke ni, malvivigite koncerne pekojn, vivu por justeco;
per lia vundo vi resaniĝis. 25 Ĉar vi estis kiel ŝafoj
erarvagantaj; sed nun vi returne venis al la Paŝtisto
kaj Episkopo de viaj animoj.

3 Tiel same, edzinoj, submetu vin al viaj propraj
edzoj; por ke, eĉ se iuj ne obeas al la vorto, ili sen
la vorto estu gajnitaj per la konduto de siaj edzinoj,
2 rigardante vian konduton kun timo ĉastan. 3 Via
ornamo estu ne la ekstera ornamo de harplektado kaj
orportado, aŭ la surmetado de vestoj; 4 sed la kaŝita
homo de la koro en la nedifektebla vesto de spirito
milda kaj trankvila, kiu estas multevalora antaŭ Dio.
5 Ĉar tiel same ankaŭ, en la tempo antikva, la sanktaj
virinoj, kiuj esperis al Dio, ornamis sin, submetante
sin al siaj propraj edzoj; 6 kiel Sara obeis al Abraham,
nomante lin sinjoro; kies infanoj vi fariĝis, bonfarante,
kaj ne ektimigate per ia teruro. 7 Tiel same, edzoj,
kunvivadu kun viaj edzinoj laŭscie, donante honoron
al la virino kiel al la plimalforta ilo, kaj estante ankaŭ
kun ili kunheredantoj de la graco de vivo, por ke
viaj preĝoj ne malhelpiĝu. 8 Fine, estu ĉiuj samideaj,
simpatiaj, fratamemaj, kompatemaj, humilanimaj;
9 ne repagantaj malbonon kontraŭ malbono, nek
insulton kontraŭ insulto, sed kontraŭe benadantaj;
ĉar al tio vi estas vokitaj, por ke vi heredu benon. 10
Ĉar: Kiu volas ami vivon kaj vidi bonajn tagojn, Tiu
gardu sian langon kontraŭ malbono, Kaj sian buŝon
kontraŭ mensoga parolo; 11 Li dekliniĝu de malbono
kaj faru bonon, Li serĉu pacon, kaj ĉasu ĝin. 12 Ĉar la
okuloj de la Eternulo estas turnitaj al la piuloj, Kaj Liaj
oreloj al iliaj krioj; Sed la vizaĝo de la Eternulo estas
kontraŭ tiuj, kiuj faras malbonon. 13 Kaj kiu faros al vi
malbonon, se vi fariĝos fervoraj en la bono? 14 Sed se
vi eĉ suferus pro justeco, feliĉegaj vi estus; kaj ilian
timon ne timu, nek maltrankviliĝu; 15 sed la Sinjoron
Kriston sanktigu en viaj koroj; estu ĉiam pretaj doni
defendan respondon al ĉiu, kiu vin demandas pri la
motivo de la espero en vi, sed kun humileco kaj timo;
16 havantaj bonan konsciencon; por ke, dum vi estas
malestimataj, hontu tiuj, kiuj kalumnias vian bonan
konduton en Kristo. 17 Ĉar pli bone estus, se tiel volus
Dio, suferi pro bonfarado, ol pro malbonfarado. 18 Ĉar
Kristo ankaŭ unufoje suferis pro pekoj, justulo pro
maljustuloj, por ke li nin konduku al Dio; mortigite en
la karno, sed vivigite en la spirito; 19 en kiu ankaŭ li
iris kaj predikis al la enkarceraj spiritoj, 20 kiuj iam
malobeis, kiam la longedaŭra pacienco de Dio atendis
en la tagoj de Noa dum la pretigado de la arkeo, en kiu
malmultaj, tio estas ok personoj, elsaviĝis tra akvo; 21
kiu ankaŭ vin nun savas en antitipo, la bapto, ne la
formetado de la karna malpuraĵo, sed la demando de
bona konscienco al Dio per la releviĝo de Jesuo Kristo;
22 kiu estas dekstre de Dio, irinte en la ĉielon; al li
anĝeloj kaj aŭtoritatoj kaj potencoj estas submetitaj.

4 Ĉar Kristo do suferis en la karno, vi ankaŭ armu
vin per la sama intenco; ĉar la suferinto en la
karno apartiĝis de pekoj; 2 por ke vi travivu la
reston de la enkarna tempo jam ne laŭ la voluptoj
de homoj, sed laŭ la volo de Dio. 3 Ĉar la tempo
pasinta sufiĉas, por elfari la deziron de la nacianoj kaj
iradi en diboĉoj, voluptoj, vindrinkado, brufestenoj,
ebrieco, kaj abomenaj idolkultoj; 4 en kio ili miras, ke
vi ne kuras kune kun ili en la saman superfluon de
diboĉado, kaj ili kalumnias vin; 5 ili prirespondos al
Tiu, kiu estas preta juĝi la vivantojn kaj la mortintojn.
6 Ĉar por tio ankaŭ la evangelio estas anoncita
al la mortintoj, por ke ili estu korpe juĝitaj laŭ
homoj, sed spirite vivu laŭ Dio. 7 Sed la fino de ĉio
alproksimiĝas; prudentiĝu do, kaj sobriĝu por preĝoj;
8 antaŭ ĉio havante fervoran amon unu al alia; ĉar
amo kovras amason da pekoj; 9 estu gastamaj unu al
alia sen murmurado; 10 laŭmezure, kiel ĉiu ricevis
donacon, tiel ĝin administrante inter vi, kiel bonaj
administrantoj de la diversaspeca graco de Dio; 11
se iu parolas, li parolu kvazaŭ orakolojn de Dio; se
iu administras, li administru kvazaŭ el la forto, kiun
Dio provizas; por ke en ĉio Dio estu glorata per Jesuo
Kristo, kies estas la gloro kaj la potenco por ĉiam
kaj eterne. Amen. (aiōn g165) 12 Amataj, ne surpriziĝu

pri la fajrego ĉe vi okazanta por provi vin, kvazaŭ io
stranga okazus ĉe vi; **13** sed laŭ tio, ke vi partoprenas
en la suferoj de Kristo, ĝoju; por ke ankaŭ en la
elmontro de lia gloro vi ĝoju ravege. **14** Se vi estas
riproĉataj pro la nomo de Kristo, feliĉegaj vi estas;
ĉar la Spirito de gloro kaj la Spirito de Dio restas
sur vi. **15** Nur neniu el vi suferu kiel mortiginto, aŭ
ŝtelisto, aŭ malbonfarinto, aŭ kiel sintrudanto en
malpropraj aferoj; **16** sed se iu suferas kiel Kristano, li
ne hontu; sed li gloru Dion en tiu nomo. **17** Ĉar jam
venis la tempo por la komenco de la juĝo ĉe la domo
de Dio; kaj se ĝi komenciĝas ĉe ni, kia estos la sorto
de tiuj, kiuj ne obeas al la evangelio de Dio? **18** Kaj
se justulo apenaŭ saviĝas, kie aperos malpiulo kaj
pekulo? **19** Tial ankaŭ tiuj, kiuj suferas laŭ la volo de
Dio, alkonfidu siajn animojn en bonfarado al fidela
Kreinto.

**5** La presbiterojn do inter vi mi admonas, estante
kunpresbitero kaj atestanto de la suferoj de Kristo
kaj partoprenanto en la malkaŝota gloro: **2** Paŝtu
la gregon de Dio ĉe vi, direktante ĝin, ne devige,
sed volonte, laŭ Dio; ne pro avideco, sed bonvole; **3**
ne kvazaŭ sinjorante super la heredo, sed fariĝante
ekzemploj al la grego. **4** Kaj kiam elmontriĝos la
Ĉefpaŝtisto, vi ricevos la nevelkontan kronon de gloro.
**5** Tiel same, vi plijunuloj, submetu vin al la pliaĝuloj.
Tial ankaŭ vi ĉiuj submetu vin unu al la alia, kaj zonu
vin per humileco; ĉar Dio kontraŭstaras al la fieruloj,
sed al la humiluloj donas gracon. **6** Humiligu vin do
sub la potencan manon de Dio, por ke Li altigu vin
ĝustatempe; **7** surĵetante sur Lin ĉian vian zorgon, ĉar
Li zorgas pri vi. **8** Estu sobraj, vigladu; via kontraŭulo,
la diablo, kiel leono blekeganta ĉirkaŭiras, serĉante,
kiun li povos forgluti; **9** lin rezistu, konstantaj en la
fido, sciante, ke la samaj suferoj plenumiĝas en via
frataro en la mondo. **10** Kaj la Dio de ĉia graco, kiu vin
alvokis al Sia eterna gloro en Kristo, mem perfektigos,
firmigos, plifortigos vin ne longe suferintajn. **(aiōnios
g166)** **11** Al Li estu la potenco por ĉiam kaj eterne.
Amen. **(aiōn g165)** **12** Per Silvano, la fidela frato, kiel
mi opinias, al vi mi skribis mallonge, konsilante kaj
atestante, ke ĉi tio estas la vera graco de Dio; en ĝi
firme staru. **13** Vin salutas la en Babel kunelektitino,
kaj Marko, mia filo. **14** Salutu unu la alian per ama
kiso. Paco al vi ĉiuj, kiuj estas en Kristo.

# 2 Petro

**1** Simon Petro, servisto kaj apostolo de Jesuo Kristo,
al tiuj, kiuj ricevis egale altvaloran fidon, kiel ni, en
la justeco de nia Dio kaj Savanto Jesuo Kristo: 2 Graco
al vi kaj paco pligrandiĝu en sciado pri Dio, kaj pri
Jesuo, nia Sinjoro; 3 pro tio, ke lia Dia povo donacis al
ni ĉion rilatantan al vivo kaj pieco, per la scio de tiu,
kiu nin vokis per sia propra gloro kaj virto; 4 per kiuj
li donacis al ni la promesojn karegajn kaj tre grandajn;
por ke per ili vi fariĝu partoprenantoj en Dia naturo,
forsaviĝinte el la putreco, kiu estas en la mondo
per voluptemo. 5 Kaj pro tiu sama kaŭzo viaflanke
aplikante ĉian diligentecon, en via fido aldonu virton;
kaj en virto scion; 6 kaj en scio sinregadon; kaj en
sinregado paciencon; kaj en pacienco piecon; 7 kaj en
pieco fratamikecon, kaj en fratamikeco amon. 8 Ĉar
tiuj ecoj, se ĉe vi ili troviĝas kaj abundas, faras vin
nek mallaboremaj nek senfruktaj en la scio de nia
Sinjoro Jesuo Kristo. 9 Ĉar tiu, al kiu mankas tiuj ecoj,
estas blinda, miopa, forgesinte la forpurigon el siaj
antaŭaj pekoj. 10 Sekve, fratoj, pli diligente klopodu,
por certigi vian vokon kaj elekton; ĉar farante tion, vi
neniam falpuŝiĝos; 11 ĉar tiel al vi estos riĉe provizita
la eniro en la eternan regnon de nia Sinjoro kaj
Savanto Jesuo Kristo. (aiōnios g166) 12 Pro tio mi ĉiam
estos preta rememorigi vin pri tiuj aferoj, kvankam vi
ilin scias kaj estas fortigitaj en la ĉeestanta vero. 13 Kaj
mi opinias konvena, dum mi estas en ĉi tiu tabernaklo,
vigligi vin per rememorigo; 14 sciante, ke baldaŭ estos
la demeto de mia tabernaklo, ĝuste kiel nia Sinjoro
Jesuo Kristo montris al mi. 15 Kaj mi diligente penos,
ke post mia foriro vi povu konstante rememori tion.
16 Ĉar ne sekvinte fabelojn sofismajn, ni konigis al vi
la potencon kaj alvenon de nia Sinjoro Jesuo Kristo,
sed vidinte per propraj okuloj lian majeston. 17 Ĉar
li ricevis de Dio, la Patro, honoron kaj gloron, kiam
al li tia voĉo estis alportita el la brilega gloro: Ĉi tiu
estas Mia Filo, la amata, en kiu Mi havas plezuron; 18
kaj tiun voĉon, alportitan el la ĉielo, ni mem aŭdis,
kunestante kun li sur la sankta monto. 19 Kaj ni havas
la profetan vorton konfirmitan; kiun atentante, vi
bone faras, kvazaŭ lampon lumantan en malhela loko,
ĝis ektagiĝos kaj la matenstelo ekleviĝos en viaj koroj;
20 antaŭ ĉio sciante, ke neniu profetaĵo de la Skribo
enhavas en si sian propran klarigon. 21 Ĉar neniam
profetaĵo estas alportita per homa volo; sed homoj,
movataj de la Sankta Spirito, parolis laŭ Dio.

**2** Sed ankaŭ falsaj profetoj troviĝis inter la popolo
tiel same, kiel inter vi estos falsaj instruistoj,
kiuj sekrete enkondukos herezojn pereigajn, eĉ
malkonfesante la Sinjoron, kiu ilin elaĉetis, kaj
venigante sur sin rapidan pereon. 2 Kaj ilian
senbridecon sekvos multaj, per kiuj la vojo de la vero
estos kalumniata. 3 Kaj en avideco per trompaj paroloj
ili vin komercos; ilia kondamno nun de post tre longe
ne malfruas, kaj ilia pereo ne dormas. 4 Ĉar se Dio ne
indulgis anĝelojn pekintajn, sed, eninferiginte ilin en
kavernojn de mallumo, transdonis ilin rezervatajn
por la juĝo; (Tartaroō g5020) 5 kaj ne indulgis la mondon
antikvan, sed gardis Noan kun sep aliaj, predikanton
de justeco, kiam Li sendis diluvon sur la mondon
de malpiuloj; 6 kaj, cindriginte la urbojn Sodom kaj
Gomora, kondamnis ilin per katastrofo, farinte ilin
ekzemplo al estontaj malpiuloj; 7 kaj savis justan
Loton, ĉagrenegatan de la senbrida konduto de la
malvirtuloj 8 (ĉar tiu justulo, loĝante inter ili, en
vidado kaj aŭdado, turmentis sian justan animon,
tagon post tago, pro iliaj malvirtaj faroj): 9 la Sinjoro
do scias savi el tento la piulojn, kaj teni sub puno
la maljustulojn ĝis la tago de juĝo; 10 sed precipe
tiujn, kiuj iras laŭ la karno en volupto de malpuraĵo,
kaj malestimas regadon. Arogantaj, obstinaj, ili ne
timas insulti aŭtoritatojn; 11 sed kontraŭe, anĝeloj,
superante laŭ forto kaj potenco, ne faras insultan
akuzon kontraŭ ili antaŭ la Sinjoro. 12 Sed tiuj, kiel
bestoj senprudentaj, naskitaj laŭ naturo por kaptado
kaj pereo, blasfemante en aferoj, kiujn ili ne scias, en
sia putreco pereos, 13 en malbono ricevante pagon por
malbono; homoj, kiuj opinias entagan diboĉon plezuro
kaj estas makuloj kaj hontindaĵoj, diboĉante en sia
uzado de la agapoj, dum ili kunfestenas kun vi; 14
havante okulojn plenajn de adulto kaj ne reteneblajn
de pekado; forlogante malfirmajn animojn; havante
koron lertan por avideco; estante filoj de malbeno; 15
forlasinte la rektan vojon kaj erarvaginte, sekvinte la
vojon de Bileam, filo de Beor, kiu amis la rekompencon
de malbonfarado; 16 sed li estis riproĉita pro sia
malobeo; muta azeno, parolante per homa voĉo,
haltigis la frenezecon de la profeto. 17 Ili estas
putoj senakvaj, kaj nebuletoj pelataj de ventego; por
ili la nigreco de mallumo estas rezervita. 18 Ĉar,

elparolante fanfaronaĵojn de vanteco, ili forlogas
en la karnovolupton per senbrideco tiujn, kiuj ĵus
forsaviĝis de tiuj, kiuj vivadas en eraro; 19 anoncante
al ili liberecon, ili mem estas sklavoj de putreco; ĉar al
kiu iu submetiĝas, al tiu ankaŭ li sklaviĝas. 20 Ĉar se,
forsaviĝinte el la malpuraĵoj de la mondo per la scio
de la Sinjoro kaj Savanto Jesuo Kristo, ili estos denove
tien implikitaj kaj venkitaj, ilia lasta stato fariĝos pli
malbona, ol la unua. 21 Ĉar estus por ili pli bone ne
ekkoni la vojon de justeco, ol, ekkoninte ĝin, returni
sin for de la sankta ordono al ili transdonita. 22 Al ili
okazis laŭ la vera proverbo: Hundo reveninta al sia
vomitaĵo, kaj porkino lavita al ruliĝado en koto.

3 Jam ĉi tiun duan epistolon, amataj, mi skribas al
vi; en ambaŭ mi instigas vian sinceran menson per
rememorigo; 2 por ke vi memoru la antaŭdirojn de
la sanktaj profetoj, kaj la ordonon de la Sinjoro kaj
Savanto per viaj apostoloj; 3 unue sciante, ke en la
lastaj tagoj mokemuloj venos kun mokado, irante laŭ
siaj propraj voluptoj, 4 kaj dirante: Kie estas la anonco
de lia alveno? ĉar de kiam la patroj endormiĝis, ĉio
restas kiel de post la komenco de la kreo. 5 Ĉar ili
volonte forgesas, ke ĉielo ekzistis de antikve, kaj tero
kunmetita el akvo kaj meze de akvo, laŭ la vorto de
Dio; 6 per kio la tiama mondo, diluvite, pereis; 7 sed la
nuna ĉielo kaj la tero per la sama vorto estas destinitaj
por fajro, rezervate ĝis la tago de juĝo kaj pereo
de malpiuloj. 8 Sed ne forgesu ĉi tiun unu aferon,
amataj, ke ĉe la Sinjoro unu tago estas kiel mil jaroj,
kaj mil jaroj kiel unu tago. 9 La Sinjoro ne malrapidas
pri la promeso, kiel iuj malrapidecon kalkulas; sed
paciencas al vi, volante, ne ke iuj pereu, sed ke ĉiuj
venu al pento. 10 Sed la tago de la Sinjoro venos,
kvazaŭ ŝtelisto; en tiu tago la ĉielo forpasos kun muĝa
bruego, kaj la elementoj brulante solviĝos, kaj la tero
kaj la faritaĵoj en ĝi forbrulos. 11 Ĉar tiamaniere ĉio
tio solviĝos, kiaj homoj vi do devus esti en sankta
konduto kaj pieco, 12 atendante kaj akcelante la
alvenon de la tago de Dio, pro kio la ĉielo flamanta
solviĝos, kaj la elementoj per fajra brulado fluidiĝos?
13 Sed laŭ Lia promeso ni atendas novan ĉielon kaj
novan teron, en kiuj loĝas justeco. 14 Tial, amataj,
tion atendante, klopodu troviĝi en paco, senmakulaj
kaj neriproĉindaj antaŭ Li. 15 Kaj rigardu la paciencon
de nia Sinjoro kiel savon; kiel ankaŭ nia amata frato
Paŭlo, laŭ la saĝeco donita al li, jam skribis al vi, 16
kiel ankaŭ en ĉiuj siaj epistoloj, parolante en ili pri ĉi
tio; en kiuj estas iuj aferoj malfacile kompreneblaj,
kiujn la malkleruloj kaj malkonstantuloj tordas, kiel
ankaŭ la ceterajn skribaĵojn, al sia propra pereo. 17 Vi
do, amataj, ĉi tion antaŭsciante, gardu vin, por ke vi
ne forlogiĝu per la eraro de la pekuloj, kaj ne defalu
de via propra konstanteco. 18 Sed kresku en graco kaj
scio de nia Sinjoro kaj Savanto Jesuo Kristo. Al li estu
la gloro nun kaj ĝis la tago de eterneco. Amen. (aiōn
g165)

# 1 Johano

1 Tion, kio estis de la komenco, kion ni aŭdis, kion
ni vidis per niaj propraj okuloj, kion ni rigardis
kaj niaj manoj palpis, koncerne la Vorton de vivo 2
(kaj la vivo elmontriĝis, kaj ni vidis kaj atestas kaj
anoncas al vi la vivon, la eternan vivon, kiu estis ĉe
la Patro kaj montriĝis al ni); (aiōnios g166) 3 kion ni
vidis kaj aŭdis, tion ni anoncas al vi, por ke vi ankaŭ
havu kunulecon kun ni; kaj nia kunuleco estas kun la
Patro kaj kun Lia Filo Jesuo Kristo; 4 kaj ĉi tion ni
skribas, por ke nia ĝojo kompletiĝu. 5 Kaj jen estas la
anonco, kiun ni aŭdis de Li kaj anoncas al vi, ke Dio
estas lumo, kaj da mallumo estas en Li neniom. 6 Se
ni diras, ke ni havas kunulecon kun Li, kaj iradas en la
mallumo, ni mensogas, kaj ne faras la veron; 7 sed se
ni iradas en la lumo, kiel Li estas en la lumo, ni havas
kunulecon unu kun la alia, kaj la sango de Jesuo, Lia
Filo, nin purigas de ĉia peko. 8 Se ni diras, ke pekon
ni ne havas, ni nin trompas, kaj la vero ne estas en ni.
9 Se ni konfesas niajn pekojn, Li estas fidela kaj justa
por pardoni al ni niajn pekojn kaj nin purigi de ĉia
maljusteco. 10 Se ni diras, ke ni ne pekis, ni faras Lin
mensoginto, kaj Lia vorto ne estas en ni.

2 Infanetoj miaj, ĉi tion mi skribas al vi, por ke vi
ne peku. Kaj se iu pekas, ni havas Advokaton ĉe la
Patro, Jesuon Kriston, la justan; 2 kaj li estas repacigo
pro niaj pekoj, kaj ne sole pro niaj, sed ankaŭ pro la
tuta mondo. 3 Kaj per ĉi tio ni scias, ke ni konas lin: se
ni observas liajn ordonojn. 4 Kiu diras: Mi lin konas,
kaj ne observas liajn ordonojn, tiu estas mensoganto,
kaj la vero ne estas en li; 5 sed en ĉiu ajn, kiu observas
lian vorton, vere perfektiĝis la amo al Dio. Per ĉi tio
ni scias, ke ni estas en li: 6 kiu diras, ke li restas en li,
tiu mem devus tiel iradi, kiel li iradis. 7 Amataj, al vi
mi skribas ne ordonon novan, sed malnovan ordonon,
kiun vi havis de la komenco; la malnova ordono estas
la vorto, kiun vi aŭdis. 8 Ankaŭ mi skribas al vi novan
ordonon, kiu estas vera en li kaj en vi; ĉar la mallumo
forpasas, kaj la vera lumo jam brilas. 9 Kiu diras,
ke li estas en la lumo, kaj malamas sian fraton, tiu
estas en la mallumo ankoraŭ ĝis nun. 10 Kiu amas
sian fraton, tiu restas en la lumo, kaj en li ne estas
faligaĵo. 11 Sed kiu malamas sian fraton, tiu estas
en la mallumo, kaj iras en la mallumo, kaj ne scias,
kien li iras, ĉar la mallumo blindigis al li la okulojn.
12 Mi skribas al vi, infanetoj, ĉar la pekoj al vi estas
pardonitaj pro lia nomo. 13 Mi skribas al vi, patroj,
ĉar vi konas tiun, kiu estas de la komenco. Mi skribas
al vi, junuloj, ĉar vi venkis la malbonulon. Mi skribis
al vi, infanoj, ĉar vi konas la Patron. 14 Mi skribis al
vi, patroj, ĉar vi konas tiun, kiu estas de la komenco.
Mi skribis al vi, junuloj, ĉar vi estas fortaj, kaj la vorto
de Dio restas en vi, kaj vi venkis la malbonulon. 15
Ne amu la mondon, nek la mondaĵojn. Se iu amas la
mondon, la amo al la Patro ne estas en li. 16 Ĉar ĉio,
kio estas en la mondo, la dezirego de la karno kaj la
dezirego de la okuloj kaj la fiereco de vivo, estas ne de
la Patro, sed de la mondo. 17 Kaj forpasas la mondo
kaj ĝia dezirego; sed la plenumanto de la volo de Dio
restas por eterne. (aiōn g165) 18 Infanoj, jam estas la
lasta horo; kaj kiel vi aŭdis, ke antikristo venas, jam
leviĝis multe da antikristoj; per tio ni scias, ke estas la
lasta horo. 19 De ni ili eliris, sed ili ne estis el ni; ĉar
se ili el ni estus, ili restus ĉe ni; sed ili eliris, por ke ili
elmontriĝu, ke ili ĉiuj ne estas el ni. 20 Kaj vi havas
sanktoleadon de la Sanktulo, kaj vi scias ĉion. 21 Mi
skribis al vi ne pro tio, ke vi ne scias la veron, sed
pro tio, ke vi ĝin scias, kaj pro tio, ke nenia mensogo
estas el la vero. 22 Kiu estas la mensogisto, krom tiu,
kiu malkonfesas, ke Jesuo estas la Kristo? Tiu estas la
antikristo, kiu malkonfesas la Patron kaj la Filon. 23
Ĉiu, kiu malkonfesas la Filon, ne havas la Patron; tiu,
kiu konfesas la Filon, havas ankaŭ la Patron. 24 Vi do
lasu resti en vi tion, kion vi aŭdis de la komenco. Se
tio, kion vi aŭdis de la komenco, restos en vi, vi ankaŭ
restos en la Filo kaj en la Patro. 25 Kaj jen estas la
promeso, kiun li promesis al ni: la vivo eterna. (aiōnios
g166) 26 Ĉi tion mi skribis al vi pri tiuj, kiuj vin forlogas
de la vojo. 27 Pri vi, la sanktoleado, kiun vi ricevis
de li, restas en vi, kaj vi ne havas bezonon, ke iu vin
instruu; sed kiel lia sanktoleado vin instruas pri ĉio
kaj estas vera kaj ne estas mensogo, kaj kiel ĝi vin
instruis, vi restas en li. 28 Kaj nun, infanetoj, restu en
li; por ke, se li elmontriĝos, ni havu kuraĝon, kaj ne
hontu antaŭ li ĉe lia alveno. 29 Se vi scias, ke li estas
justa, vi scias, ke ankaŭ ĉiu, kiu faras justecon, el li
naskiĝis.

3 Rigardu, kian amon la Patro donis al ni, ke ni estas
nomataj infanoj de Dio; kaj tiaj ni estas. Pro tio la
mondo nin ne konas, ĉar ĝi Lin ne konis. 2 Amataj, nun
ni estas infanoj de Dio, kaj ankoraŭ ne elmontriĝis,

kio ni estos. Ni scias, ke se li elmontriĝos, ni estos
similaj al li; ĉar ni vidos lin, kiel li estas. 3 Kaj ĉiu,
kiu havas ĉi tiun esperon rilate lin, sin sanktigas tiel
same, kiel li estas sankta. 4 Ĉiu, kiu faras pekon, faras
ion kontraŭ la leĝo; kaj peko estas kontraŭleĝeco. 5
Kaj vi scias, ke li elmontriĝis, por forigi pekojn; kaj
peko ne estas en li. 6 Ĉiu, kiu restas en li, ne pekas;
ĉiu pekanto lin ne vidis, nek lin konas. 7 Infanetoj,
neniu vin forlogu; kiu faras justecon, tiu estas justa
tiel same, kiel li estas justa; 8 kiu faras pekon, tiu
estas el la diablo; ĉar la diablo pekas de la komenco.
Por tio la Filo de Dio elmontriĝis, por ke li detruu la
farojn de la diablo. 9 Ĉiu, kiu naskiĝis de Dio, ne faras
pekon, ĉar lia semo restas en li; kaj li ne povas peki,
ĉar li naskiĝis de Dio. 10 Jen kiel evidentiĝas la infanoj
de Dio, kaj la infanoj de la diablo: ĉiu, kiu ne faras
justecon, ne estas de Dio, nek tiu, kiu ne amas sian
fraton. 11 Ĉar jen estas la anonco, kiun vi aŭdis de la
komenco: ke ni amu unu la alian; 12 ne kiel Kain estis
de la malbonulo kaj mortigis sian fraton. Kaj pro kio li
lin mortigis? Ĉar liaj faroj estis malbonaj, kaj la faroj
de lia frato estis justaj. 13 Ne miru, fratoj, se la mondo
vin malamas. 14 Ni scias, ke ni jam pasis el morto
en vivon, ĉar ni amas la fratojn. Kiu ne amas, tiu
restas en morto. 15 Ĉiu, kiu malamas sian fraton, estas
hommortiganto; kaj vi scias, ke ĉiu hommortiganto
ne havas vivon eternan, restantan en li. (aiōnios g166) 16
Per ĉi tio ni konas amon: ĉar li demetis sian vivon pro
ni; kaj ni devus demeti nian vivon pro la fratoj. 17 Sed
se iu havas mondan posedaĵon kaj vidas sian fraton
havantan bezonon kaj fermas sian kompaton kontraŭ
li, kiel la amo de Dio restas en li? 18 Infanetoj, ni amu,
ne laŭ vorto nek laŭ lango, sed laŭ faro kaj vero. 19
Per tio ni scios, ke ni estas el la vero, kaj ni certigos
nian koron antaŭ Li 20 en ĉio ajn, pri kio nia koro nin
kondamnas; ĉar Dio estas pli granda ol nia koro, kaj
scias ĉion. 21 Amataj, se nia koro ne kondamnas nin,
ni havas kuraĝon antaŭ Dio; 22 kaj ĉion ajn, kion ni
petas, ni ricevas de Li, ĉar ni observas Liajn ordonojn,
kaj faras tion, kio plaĉas antaŭ Li. 23 Kaj jen estas
Lia ordono, ke ni kredu al la nomo de Lia Filo, Jesuo
Kristo, kaj amu unu la alian tiel same, kiel Li al ni
donis ordonon. 24 Kaj kiu observas Liajn ordonojn, tiu
en Li restas, kaj Li en tiu. Kaj per tio ni scias, ke Li
restas en ni: per la Spirito, kiun Li donis al ni.

4 Amataj, kredu ne al ĉiu spirito, sed provu la
spiritojn, ĉu ili estas el Dio; ĉar multaj falsaj profetoj
eliris en la mondon. 2 Jen kiel vi ekkonas la Spiriton
de Dio: ĉiu spirito, kiu konfesas, ke Jesuo Kristo venis
en la karno, estas el Dio; 3 kaj ĉiu spirito, kiu ne
konfesas Jesuon, ne estas el Dio; kaj ĉi tiu estas la
spirito de antikristo, pri kiu vi aŭdis, ke ĝi venas; kaj
nun ĝi jam estas en la mondo. 4 Infanetoj, vi estas el
Dio, kaj ilin venkis; ĉar pli granda estas Tiu, kiu estas
en vi, ol tiu, kiu estas en la mondo. 5 Ili estas el la
mondo; pro tio ili parolas laŭ la mondo, kaj la mondo
ilin aŭskultas. 6 Ni estas el Dio; kiu konas Dion, tiu
nin aŭskultas; kiu ne estas el Dio, tiu nin ne aŭskultas.
Jen kiel ni ekkonas la spiriton de vero, kaj la spiriton
de eraro. 7 Amataj, ni amu unu la alian; ĉar la amo
estas el Dio; kaj ĉiu, kiu amas, naskiĝas el Dio kaj Dion
konas. 8 Kiu ne amas, tiu ne konas Dion, ĉar Dio estas
amo. 9 Jen kiel la amo de Dio elmontriĝis en ni: ke Dio
sendis en la mondon Sian Filon solenaskitan, por ke
ni vivu per li. 10 Jen estas la amo, ne ke ni amis Dion,
sed ke Li amis nin, kaj sendis Sian Filon kiel repacigon
pro niaj pekoj. 11 Amataj, se Dio tiel amis nin, ni
ankaŭ devus ami unu la alian. 12 Dion neniu iam vidis;
se ni reciproke nin amas, Dio restas en ni, kaj Lia amo
perfektiĝis en ni; 13 jen kiel ni scias, ke ni restas en Li,
kaj Li en ni: ĉar el Sia Spirito Li donis al ni. 14 Kaj ni
vidis kaj atestas, ke la Patro sendis la Filon por esti la
Savonto de la mondo. 15 En ĉiu ajn, kiu konfesas, ke
Jesuo estas la Filo de Dio, Dio restas, kaj li en Dio. 16
Kaj ni konas kaj kredis la amon, kiun Dio havas al ni.
Dio estas amo; kaj kiu restas en amo, tiu restas en Dio,
kaj Dio restas en li. 17 Jen kiel amo perfektiĝis ĉe ni:
ke ni havu kuraĝon en la tago de juĝo; ĉar ĝuste kia li
estas, tiaj ankaŭ ni estas en ĉi tiu mondo. 18 Timo ne
ekzistas en amo; sed perfekta amo elĵetas timon, ĉar
timo havas turmentegon; kaj timanto ne perfektiĝas
en amo. 19 Ni amas, ĉar Li unue nin amis. 20 Se iu
diras: Mi amas Dion, kaj malamas sian fraton — tiu
estas mensoganto; ĉar kiu ne amas sian fraton, kiun li
vidis, tiu ne povas ami Dion, kiun li ne vidis. 21 Kaj la
jenan ordonon ni havas de Li: ke kiu amas Dion, tiu
amu ankaŭ sian fraton.

5 Ĉiu, kiu kredas, ke Jesuo estas la Kristo, naskiĝis
el Dio; kaj ĉiu, kiu amas la Naskinton, amas ankaŭ
la naskiton el Li. 2 Per tio ni ekscias, ke ni amas la
infanojn de Dio, kiam ni amas Dion kaj plenumas Liajn

ordonojn. 3 Ĉar jen estas la amo al Dio: ke ni observas
Liajn ordonojn; kaj Liaj ordonoj ne estas pezaj. 4 Ĉar
ĉio, kio el Dio naskiĝis, venkas la mondon; kaj jen
estas la venko venkinta la mondon: nia fido. 5 Kaj kiu
estas la venkanto de la mondo, krom tiu, kiu kredas,
ke Jesuo estas la Filo de Dio? 6 Ĉi tiu estas la veninto
per akvo kaj sango, Jesuo Kristo; ne sole en la akvo,
sed en la akvo kaj en la sango. 7 Kaj la Spirito estas la
atestanto, ĉar la Spirito estas la vero. 8 Ĉar tri estas la
atestantoj: la Spirito, kaj la akvo, kaj la sango; kaj la
tri en unu konsentas. 9 Se ni akceptas la ateston de
homoj, pli granda estas la atesto de Dio; ĉar jen estas
la atesto de Dio: ke Li atestis pri Sia Filo. 10 Kiu kredas
al la Filo de Dio, tiu havas en si la ateston; kiu ne
kredas al Dio, tiu faris Lin mensoginto, pro tio, ke li ne
kredis la ateston, kiun Dio atestis pri Sia Filo. 11 Kaj
jen estas la atesto: ke Dio donis al ni la vivon eternan;
kaj tiu vivo estas en Lia Filo. **(aiōnios g166)** 12 Kiu havas
la Filon, tiu havas la vivon; kiu ne havas la Filon de
Dio, tiu la vivon ne havas. 13 Ĉi tion mi skribis al vi,
por ke vi sciu, ke vi havas vivon eternan; al vi, kiuj
kredas al la nomo de la Filo de Dio. **(aiōnios g166)** 14 Kaj
jen estas la kuraĝo, kiun ni havas antaŭ Li: ke se ni ion
petas laŭ lia volo, Li nin aŭskultas; 15 kaj se ni scias,
ke kion ajn ni petas, Li nin aŭskultas, ni scias, ke ni
havas la petojn, kiujn ni petis de Li. 16 Se iu vidas sian
fraton pekantan pekon ne al morto, tiu petos, kaj Li
donos al li vivon, por la pekantoj ne al morto. Ekzistas
peko al morto; ne pri tio mi diras, ke li petegu. 17 Ĉia
nejusteco estas peko; kaj ekzistas peko ne al morto. 18
Ni scias, ke ĉiu naskito el Dio ne pekas; sed la naskito
el Dio sin gardas, kaj la malbonulo lin ne tuŝas. 19 Ni
scias, ke ni el Dio estas, kaj la tuta mondo kuŝas en la
malbonulo. 20 Kaj ni scias, ke la Filo de Dio venis kaj
al ni donis komprenon, por ke ni ekkonu la Verulon;
kaj ni estas en la Verulo, en Lia Filo, Jesuo Kristo. Tiu
estas la vera Dio, kaj la vivo eterna. **(aiōnios g166)** 21
Infanetoj, gardu vin kontraŭ idoloj.

# 2 Johano

1 La presbitero al la elektita sinjorino kaj ŝiaj infanoj,
kiujn mi amas en la vero; kaj ne mi sola, sed ankaŭ
ĉiuj, kiuj konas la veron; 2 pro la vero restanta en ni,
kaj ĝi estos ĉe ni por ĉiam: (aiōn g165) 3 Graco, kompato,
paco, estos ĉe ni, de Dio, la Patro, kaj de Jesuo Kristo,
la Filo de la Patro, en vero kaj amo. 4 Mi treege ĝojas,
ke mi trovis iujn el viaj infanoj iradantajn en la vero
tiel same, kiel ni ricevis ordonon de la Patro. 5 Kaj
nun mi vin petegas, sinjorino, skribante ne kvazaŭ
novan ordonon al vi, sed tiun, kiun ni havis de la
komenco, ke ni amu unu la alian. 6 Kaj jen estas la
amo: ke ni iradu laŭ Liaj ordonoj. Tio estas la ordono,
tiu sama, kiun vi aŭdis de la komenco, ke vi iradu en
ĝi. 7 Ĉar multaj delogantoj eliris en la mondon, kiuj
ne konfesas Jesuon Kriston venantan en karno. Tio
estas la deloganto kaj la antikristo. 8 Gardu vin, ke vi
ne perdu viajn elfaritaĵojn, sed ke vi ricevu plenan
rekompencon. 9 Ĉiu, kiu iras antaŭen kaj ne restas en
la instruado de Kristo, ne havas Dion; kiu restas en la
instruado, tiu havas kaj la Patron kaj la Filon. 10 Se
iu al vi venas kaj ne kunportas ĉi tiun instruadon,
ne ricevu lin en la domon, kaj al li ne donu salutan
vorton; 11 ĉar kiu al li salute parolas, tiu partoprenas
en liaj malbonfaroj. 12 Havante multon por skribi
al vi, mi ne volis skribi per papero kaj inko; sed mi
esperas veni al vi kaj paroli vizaĝon kontraŭ vizaĝo,
por ke via ĝojo estu plena. 13 Salutas vin la infanoj de
via fratino, la elektita.

# 3 Johano

1 La presbitero al Gajo, la amata, kiun mi amas en
la vero. 2 Amato, mi preĝas, ke al vi prosperu
ĉio, kaj vi bonsanu tiel same, kiel prosperas al via
animo. 3 Ĉar mi treege ĝojis, kiam fratoj venis kaj
atestis pri via vereco, kiel vi iradas en la vero. 4 Pli
grandan ĝojon mi ne havas, ol aŭdi pri miaj infanoj
iradantaj en la vero. 5 Amato, vi faras fidele rilate al
ĉiuj viaj klopodoj por la fratoj kaj tiuj fremduloj, 6 kiuj
atestis vian amon antaŭ la eklezio; kaj vi faros bone,
tiujn antaŭenigante dece je Dio, 7 ĉar pro la Nomo ili
eliris, akceptante nenion de la nacianoj. 8 Ni devas
do akcepti tiajn, por ke ni estu kunlaborantoj kun la
vero. 9 Mi skribis iom al la eklezio; sed Diotrefes, kiu
amas la estrecon inter ili, nin ne akceptas. 10 Tial,
se mi venos, mi rememorigos al li la farojn, kiujn li
faras, per malbonaj paroloj babilante kontraŭ ni; kaj
ne kontenta je tio, li mem ne akceptas la fratojn, nek
tion permesas al tiuj, kiuj volas, kaj ilin el la eklezio
elpelas. 11 Amato, imitu ne la malbonon, sed la bonon.
Bonfaranto estas el Dio; malbonfaranto ne vidis Dion.
12 Pri Demetrio estas atestite de ĉiuj, kaj de la vero
mem; kaj ni ja atestas; kaj vi scias, ke nia atesto estas
vera. 13 Mi havis multon por skribi al vi; sed mi ne
volas skribi al vi per inko kaj kano; 14 sed mi esperas
vidi vin baldaŭ, kaj ni parolos vizaĝon kontraŭ vizaĝo.
Paco al vi. Salutas vin la amikoj. Salutu laŭ nomo la
amikojn.

# Judas

1 Judas, servisto de Jesuo Kristo kaj frato de Jakobo, al
la alvokitoj, amataj en Dio, la Patro, kaj konservitaj
por Jesuo Kristo: 2 Kompato al vi kaj paco kaj amo
pligrandiĝu. 3 Amataj, kiam mi faris ĉian diligentecon,
por skribi al vi pri nia komuna savo, mi deviĝis skribi
al vi, por kuraĝigi vin batali por la kredo, jam per
unu fojo transdonita al la sanktuloj. 4 Ĉar enŝteliĝis
iuj homoj, jam antaŭ longe destinitaj por ĉi tiu
kondamno, malpiuloj, ŝanĝante la gracon de nia Dio
en diboĉecon, kaj malkonfesante la solan Estron kaj
nian Sinjoron Jesuo Kristo. 5 Mi do volas rememorigi
vin, kvankam vi jam per unu fojo sciiĝis pri ĉio,
ke la Sinjoro, savinte popolon el la Egipta lando,
poste pereigis la nekredantojn. 6 Kaj anĝelojn, kiuj
ne konservis sian regadon, sed forlasis sian propran
loĝejon, Li rezervis sub mallumo en katenoj ĉiamaj
ĝis la juĝo en la granda tago. **(aïdios g126)** 7 Kiel ankaŭ
Sodom kaj Gomora kaj la ĉirkaŭaj urboj tiel same,
kiel ĉi tiuj, malĉastiĝinte kaj foririnte post fremdan
karnon, estas elmontritaj kiel ekzemplo, suferante la
punon de eterna fajro. **(aiōnios g166)** 8 Tamen tiel same
ankaŭ ĉi tiuj en siaj sonĝadoj malpurigas la karnon,
malestimas aŭtoritaton, kaj insultas honorojn. 9 Sed
Miĥael, la ĉefanĝelo, kiam en kontraŭstaro al la diablo
li disputis pri la korpo de Moseo, ne kuraĝis lin akuzi
insulte, sed diris: La Sinjoro vin riproĉu. 10 Sed tiuj
insultas ja ĉion, kion ili ne scias; sed kion ili per naturo
komprenas, kiel la bestoj senprudentaj, en tio ili
malvirtiĝas. 11 Ve al ili! ĉar ili iris sur la vojo de Kain,
kaj forĵetis sin en la eraron de Bileam por dungopago,
kaj pereis en la kontraŭdirado de Koraĥ. 12 Ili estas la
subakvaj rokoj en viaj agapoj, kun vi kunfestenante,
sentime sin paŝtante; nuboj senakvaj, per vento
disportataj; aŭtunaj arboj senfruktaj, dufoje mortintaj,
elradikigitaj; 13 sovaĝaj marondoj, elŝaŭmantaj siajn
hontindaĵojn; steloj vagantaj, por kiuj la nigreco de
mallumo por eterne estas rezervata. **(aiōn g165)** 14
Kaj al ili ankaŭ Ĥanoĥ, la sepa post Adam, profetis,
dirante: Jen la Sinjoro venis kun Siaj sanktaj miriadoj,
15 por fari juĝon kontraŭ ĉiuj, kaj por kondamni
ĉiujn malpiulojn pri ĉiuj malpiaĵoj, kiujn ili malpie
faris, kaj pri ĉiuj obstinaj paroloj, kiujn malpiaj
pekuloj parolis kontraŭ Li. 16 Ili estas murmuremuloj,
plendemuloj, irantaj laŭ siaj voluptoj (dum ilia buŝo
parolas fanfaronaĵojn) kaj favorantaj personojn pro
profito. 17 Sed vi, amataj, memoru la dirojn antaŭe
parolitajn de la apostoloj de nia Sinjoro Jesuo Kristo;
18 nome, ke ili diris al vi: En la lasta tempo estos
mokemuloj, irantaj laŭ siaj propraj voluptoj malpiaj.
19 Tiuj estas la apartigantoj, laŭsentaj, ne havantaj la
Spiriton. 20 Sed vi, amataj, konstruante vin sur via
plej sankta fido, preĝante en la Sankta Spirito, 21
konservu vin en la amo al Dio, atendante la kompaton
de nia Sinjoro Jesuo Kristo por eterna vivo. **(aiōnios g166)**
22 Kaj unujn, kiuj ŝanceliĝas, indulgu; 23 kaj unujn
savu, eltirante ilin el la fajro; kaj aliajn kompatu kun
timo; malamante eĉ la veston makulitan de la karno.
24 Kaj al Tiu, kiu povas vin gardi senfalaj, kaj starigi
vin senriproĉaj antaŭ Sia gloro en granda ĝojo, 25 al
la sola Dio, nia Savanto, per Jesuo Kristo, nia Sinjoro,
estu gloro, majesto, potenco, kaj aŭtoritato, antaŭ ĉiu
mondaĝo, kaj nun, kaj ĝis la eterneco. Amen. **(aiōn g165)**

# Apokalipso

1 Apokalipso de Jesuo Kristo, kiun Dio donis al li,
por montri al siaj servistoj tion, kio devas baldaŭ
okazi; kaj Li sendis kaj montris ĝin per Sia anĝelo al
Sia servisto Johano, 2 kiu atestis la vorton de Dio
kaj la ateston de Jesuo Kristo, pri ĉio, kion li vidis. 3
Feliĉaj estas la leganto kaj la aŭskultantoj de la vortoj
de la profetaĵo kaj la observantoj de la skribitaĵoj en
ĝi; ĉar la tempo estas proksima. 4 Johano al la sep
eklezioj en Azio: Graco al vi kaj paco de Tiu, kiu estas
kaj estis kaj venos; kaj de la sep spiritoj antaŭ Lia
trono; 5 kaj de Jesuo Kristo, la fidela atestanto, la
unuenaskita el la mortintoj, kaj la reganto de la reĝoj
de la tero. Al tiu, kiu nin amas, kaj nin malligis de
niaj pekoj per sia sango, 6 kaj faris nin regno, pastroj
al lia Dio kaj Patro; al li la gloro kaj la potenco por
ĉiam kaj eterne. Amen. (aiōn g165) 7 Jen li venas kun la
nuboj; kaj lin vidos ĉiu okulo, kaj tiuj, kiuj lin trapikis;
kaj ĉiuj gentoj de la tero ploros pro li. Vere, Amen.
8 Mi estas la Alfa kaj la Omega, diras la Sinjoro, la
Dio, kiu estas kaj estis kaj venos, la Plejpotenca. 9
Mi, Johano, via frato kaj partoprenanto kun vi en
la aflikto kaj regno kaj pacienco de Jesuo, estis sur
la insulo nomata Patmos pro la vorto de Dio kaj la
atesto de Jesuo. 10 Mi min trovis en la Spirito en la
tago de la Sinjoro, kaj mi aŭdis malantaŭ mi grandan
voĉon kvazaŭ de trumpeto, 11 dirantan: Kion vi vidas,
tion skribu en libron kaj sendu al la sep eklezioj: al
Efeso kaj al Smirna kaj al Pergamo kaj al Tiatira kaj
al Sardes kaj al Filadelfia kaj al Laodikea. 12 Kaj mi
min turnis, por vidi la voĉon, kiu parolis kun mi. Kaj
turniĝinte, mi vidis sep orajn lampingojn; 13 kaj meze
de la sep lampingoj iun similan al la Filo de homo,
vestitan ĝispiede, kaj zonitan ĉirkaŭ la brusto per
ora zono. 14 Kaj lia kapo kaj liaj haroj estis blankaj
kiel blanka lano, kiel neĝo; kaj liaj okuloj estis kiel
fajra flamo; 15 kaj liaj piedoj estis kiel brilanta latuno,
kvazaŭ rafinita en forno; kaj lia voĉo estis kiel voĉo de
multaj akvoj. 16 Kaj li havis en sia dekstra mano sep
stelojn; kaj el lia buŝo eliris akra dutranĉa glavo; kaj
lia aspekto estis kiel brilas la suno en sia forteco. 17
Kaj kiam mi vidis lin, mi falis ĉe liaj piedoj kvazaŭ
senviva. Kaj li metis sian dekstran manon sur min,
dirante: Ne timu; mi estas la unua kaj la lasta, 18 kaj
la vivanta; kaj mi fariĝis mortinta, kaj jen, mi estas
vivanta por ĉiam kaj eterne, kaj mi havas la ŝlosilojn
de la morto kaj de Hades. (aiōn g165, Hadēs g86) 19 Skribu
do tion, kion vi vidis, kaj kio estas, kaj kio okazos
poste; 20 la misteron de la sep steloj, kiujn vi vidis en
mia dekstra mano, kaj la sep orajn lampingojn. La
sep steloj estas la anĝeloj de la sep eklezioj; kaj la sep
lampingoj estas la sep eklezioj.

2 Al la anĝelo de la eklezio en Efeso skribu: Tiele
diras la tenanto de la sep steloj en sia dekstra
mano, la iranto meze de la sep oraj lampingoj: 2 Mi
scias viajn farojn, kaj vian laboron kaj vian paciencon,
kaj ke vi ne povas toleri la malbonulojn, kaj ke vi
provis tiujn, kiuj nomas sin apostoloj kaj ne estas tiaj,
kaj trovis ilin malveraj; 3 kaj vi havas paciencon kaj
toleris pro mia nomo kaj ne laciĝis. 4 Sed mi havas
kontraŭ vi, ke vi forlasis vian unuan amon. 5 Memoru
do, de kie vi falis, kaj pentu, kaj faru la unuajn farojn;
alie mi venos al vi, kaj formovos vian lampingon el
ĝia loko, se vi ne pentos. 6 Sed ĉi tion vi havas, ke vi
malamas la farojn de la Nikolaitoj, kiujn mi ankaŭ
malamas. 7 Kiu havas orelon, tiu aŭskultu, kion la
Spirito diras al la eklezioj. Al la venkanto mi donos
manĝi el la arbo de vivo, kiu estas en la Paradizo de
Dio. 8 Kaj al la anĝelo de la eklezio en Smirna skribu:
Tiele diras la unua kaj la lasta, kiu fariĝis senviva kaj
vivis: 9 Mi scias vian aflikton kaj vian malriĉecon (vi
tamen estas riĉa), kaj la blasfemon de tiuj, kiuj nomas
sin Judoj, kaj estas ne tiaj, sed sinagogo de Satano. 10
Ne timu tion, kion vi suferos; jen la diablo ĵetos iujn
el vi en malliberejon, por ke vi estu elprovataj; kaj vi
havos aflikton dek tagojn. Estu fidela ĝis morto, kaj
mi donos al vi la kronon de vivo. 11 Kiu havas orelon,
tiu aŭskultu, kion la Spirito diras al la eklezioj. La
venkanto tute ne difektiĝos de la dua morto. 12 Kaj al
la anĝelo de la eklezio en Pergamo skribu: Tiele diras
la portanto de la akra dutranĉa glavo: 13 Mi scias, kie
vi loĝas: tie, kie estas la trono de Satano; kaj vi tenas
firme mian nomon, kaj ne malkonfesis mian fidon, eĉ
en la tagoj de Antipas, mia fidela atestinto, kiu estis
mortigita inter vi, kie loĝas Satano. 14 Sed mi havas
kelkon kontraŭ vi: ke vi havas tie sekvantojn de la
instruo de Bileam, kiu instruis al Balak ĵeti falilon
antaŭ la Izraelidojn, por ke ili manĝu idoloferitaĵojn
kaj malĉastu. 15 Kaj vi ankaŭ havas sekvantojn de la
instruo de la Nikolaitoj tiel same. 16 Pentu do; alie mi
rapide venos al vi, kaj militos kontraŭ ili per la glavo
de mia buŝo. 17 Kiu havas orelon, tiu aŭskultu, kion la

Spirito diras al la eklezioj. Al la venkanto mi donos el
la kaŝita manao, kaj mi donos al li blankan ŝtoneton,
kaj sur la ŝtoneto novan nomon skribitan, kiun konas
neniu krom la ricevanto. **18** Kaj al la anĝelo de la
eklezio en Tiatira skribu: Tiele diras la Filo de Dio, kiu
havas okulojn kiel fajra flamo, kaj liaj piedoj estas
kiel brilanta latuno: **19** Mi scias viajn farojn, kaj viajn
amon kaj fidon kaj servadon kaj paciencon, kaj pri viaj
faroj, ke la lastaj estas pli multaj ol la unuaj. **20** Sed mi
havas kontraŭ vi, ke vi toleras la virinon Izebel, kiu
nomas sin profetino; kaj ŝi instruas kaj delogas miajn
servistojn malĉasti kaj manĝi idoloferitaĵojn. **21** Kaj
mi donis al ŝi tempon, por ke ŝi pentu; kaj ŝi ne volas
penti pri sia malĉasteco. **22** Jen mi ĵetos ŝin en liton,
kaj la kun ŝi adultantojn en grandan aflikton, se ili ne
pentos pri ŝiaj faroj. **23** Kaj mi pereigos ŝiajn idojn
per morto; kaj ĉiuj eklezioj scios, ke mi estas tiu, kiu
esploras internaĵojn kaj korojn; kaj mi donos al ĉiu el
vi laŭ viaj faroj. **24** Sed al vi mi diras, al la ceteraj en
Tiatira, al ĉiuj, kiuj ne havas ĉi tiun instruon, kaj kiuj
ne konas la profundaĵojn de Satano, kiel oni diras:
Mi ne ĵetos sur vin alian ŝarĝon. **25** Tamen tion, kion
vi havas, tenu, ĝis mi venos. **26** Kaj al la venkanto
kaj la observanto de miaj faroj ĝis la fino mi donos
aŭtoritaton super la nacioj; **27** kaj li regos ilin per fera
sceptro, kiel la potaj vazoj estas dispecigataj; kiel mi
ankaŭ ricevis de mia Patro; **28** kaj mi donos al li la
matenan stelon. **29** Kiu havas orelon, tiu aŭskultu,
kion la Spirito diras al la eklezioj.

**3** Kaj al la anĝelo de la eklezio en Sardes skribu:
Tiele diras tiu, kiu havas la sep Spiritojn de Dio,
kaj la sep stelojn: Mi scias viajn farojn, ke vi estas
nomata viva, kaj estas malviva. **2** Fariĝu vigla, kaj
firmigu la restaĵojn, kiuj estis preskaŭ mortantaj; ĉar
mi ne trovis viajn farojn plenumitaj antaŭ mia Dio. **3**
Memoru do, kiel vi ricevis kaj aŭdis; kaj observu, kaj
pentu. Se do vi ne viglos, mi venos, kvazaŭ ŝtelisto,
kaj vi ne scios, je kiu horo mi venos al vi. **4** Sed vi
havas en Sardes kelkajn nomojn, kiuj ne makulis siajn
vestojn; kaj ili promenos kun mi en blankaĵoj; ĉar
ili estas indaj. **5** La venkanto estos tiel vestita per
blankaj vestoj; kaj mi ja ne elstrekos lian nomon el la
libro de vivo, kaj mi konfesos lian nomon antaŭ mia
Patro kaj antaŭ Liaj anĝeloj. **6** Kiu havas orelon, tiu
aŭskultu, kion la Spirito diras al la eklezioj. **7** Kaj al la
anĝelo de la eklezio en Filadelfia skribu: Tiele diras la
sanktulo, la verulo, kiu havas la ŝlosilon de David,
tiu, kiu malfermas, kaj neniu fermas; kiu fermas,
kaj neniu malfermas: **8** Mi scias viajn farojn (jen mi
donis antaŭ vi pordon malfermitan, kiun neniu povas
fermi), ke vi havas kelkan potencon, kaj observis mian
vorton, kaj ne malkonfesis mian nomon. **9** Jen mi
donas el la sinagogo de Satano, kiuj sin nomas Judoj,
kaj estas ne tiaj, sed mensogas; jen mi igos ilin veni
kaj adorkliniĝi antaŭ viaj piedoj, kaj scii, ke mi vin
amis. **10** Ĉar vi observis la vorton de mia pacienco,
mi ankaŭ vin konservos el tiu horo de provo, kiu
venos sur la tutan mondon, por provi la loĝantojn
sur la tero. **11** Mi venos rapide; tenadu tion, kion
vi havas, por ke neniu forprenu vian kronon. **12** La
venkanton mi faros kolono en la templo de mia Dio,
kaj li ne plu eliros el ĝi; kaj mi skribos sur li la nomon
de mia Dio, kaj la nomon de la urbo de mia Dio, la
nova Jerusalem, kiu venas malsupren de mia Dio el la
ĉielo, kaj mian novan nomon. **13** Kiu havas orelon, tiu
aŭskultu, kion la Spirito diras al la eklezioj. **14** Kaj al
la anĝelo de la eklezio en Laodikea skribu: Tiele diras
la Amen, la atestanto fidela kaj vera, la komenco de
la kreo de Dio: **15** Mi scias viajn farojn, ke vi estas
nek malvarma, nek varmega; mi volus, ke vi estu aŭ
malvarma aŭ varmega. **16** Tial, ĉar vi estas varmeta,
kaj nek malvarma nek varmega, mi elsputos vin el
mia buŝo. **17** Ĉar vi diras: Mi estas riĉa kaj akiris riĉon,
kaj nenion mi bezonas; kaj vi ne scias, ke vi estas
la mizera kaj kompatinda kaj malriĉa kaj blinda kaj
nuda; **18** mi konsilas al vi aĉeti de mi oron rafinitan
per fajro, por ke vi riĉiĝu; kaj blankajn vestojn, por
ke vi vin vestu, kaj por ke ne aperu la honto de via
nudeco; kaj kolirion, por ŝmiri viajn okulojn, por ke vi
vidu. **19** Ĉiujn, kiujn mi amas, mi riproĉas kaj punas;
estu do fervora, kaj pentu. **20** Jen mi staras ĉe la pordo
kaj frapas; se iu aŭdas mian voĉon kaj malfermas la
pordon, mi eniros al li kaj manĝos kun li, kaj li kun
mi. **21** Al la venkanto mi donos sidiĝi kun mi sur mia
trono, kiel mi ankaŭ venkis kaj sidiĝis kun mia Patro
sur Lia trono. **22** Kiu havas orelon, tiu aŭskultu, kion
la Spirito diras al la eklezioj.

**4** Post tio mi rigardis, kaj jen pordo malfermita en
la ĉielo, kaj la unua voĉo, kiun mi aŭdis, estis
voĉo kvazaŭ de trumpeto parolanta kun mi, dirante:
Suprenvenu ĉi tien, kaj mi montros al vi tion, kio
devas okazi poste. **2** Tuj mi min trovis en la Spirito;

kaj jen trono stariĝis en la ĉielo, kaj sur la trono unu
sidanta; 3 kaj la Sidanto estis en aspekto simila al
ŝtono jaspisa kaj sardia; kaj jen ĉielarko ĉirkaŭ la
trono, aspekte simila al smeraldo. 4 Kaj ĉirkaŭ la
trono estis dudek kvar tronoj; kaj sur la tronoj mi
vidis dudek kvar presbiterojn sidantajn, vestitajn per
blankaj vestoj; kaj sur iliaj kapoj orajn kronojn. 5
Kaj el la trono eliris fulmoj kaj voĉoj kaj tondroj.
Kaj antaŭ la trono brulis sep fajraj torĉoj, kiuj estas
la sep Spiritoj de Dio; 6 kaj antaŭ la trono kvazaŭ
vitra maro, simila al kristalo; kaj meze apud la trono
kaj ronde ĉirkaŭ la trono kvar kreitaĵoj, plenaj de
okuloj antaŭe kaj malantaŭe. 7 Kaj la unua kreitaĵo
similis leonon, kaj la dua kreitaĵo similis bovidon, kaj
la tria kreitaĵo havis vizaĝon kvazaŭ homan, kaj la
kvara kreitaĵo similis aglon flugantan. 8 Kaj la kvar
kreitaĵoj, havantaj po ses flugiloj, estas ĉirkaŭe kaj
interne plenaj de okuloj; kaj paŭzon ili ne havas tage
kaj nokte, dirante: Sankta, sankta, sankta, estas Dio,
la Sinjoro, la Plejpotenca, la estanta kaj estinta kaj
venonta. 9 Kaj kiam la kreitaĵoj donos gloron kaj
honoron kaj dankon al la Sidanto sur la trono, al la
Vivanto por ĉiam kaj eterne, (aiōn g165) 10 la dudek kvar
presbiteroj falos antaŭ la Sidanto sur la trono, kaj ili
adorkliniĝos al la Vivanto por ĉiam kaj eterne, kaj
ĵetos siajn kronojn antaŭ la trono, dirante: (aiōn g165)
11 Inda Vi estas, ho nia Sinjoro kaj nia Dio, ricevi la
gloron kaj la honoron kaj la potencon; ĉar Vi kreis
ĉion, kaj pro Via volo ĉio ekzistis kaj kreiĝis.

**5** Kaj mi vidis en la dekstra mano de la Sidanto sur
la trono libron, skribitan interne kaj malantaŭe,
sigelitan per sep sigeloj. 2 Kaj mi vidis fortan
anĝelon, proklamantan per granda voĉo: Kiu estas
inda malfermi la libron kaj rompi ĝiajn sigelojn? 3
Kaj neniu en la ĉielo, nek sur la tero, nek sub la tero,
povis malfermi la libron, aŭ rigardi ĝin. 4 Kaj mi multe
ploris, ĉar troviĝis neniu inda malfermi la libron, aŭ
ĝin rigardi; 5 kaj unu el la presbiteroj diris al mi: Ne
ploru; jen la leono el la tribo de Jehuda, la Markoto de
David, venkis, por malfermi la libron kaj ĝiajn sep
sigelojn. 6 Kaj mi vidis meze inter la trono kaj la kvar
kreitaĵoj, kaj meze de la presbiteroj, Ŝafidon starantan,
kvazaŭ oferbuĉitan, havantan sep kornojn kaj sep
okulojn, kiuj estas la sep Spiritoj de Dio, senditaj sur la
tutan teron. 7 Kaj li venis, kaj prenis ĝin el la dekstra
mano de la Sidanto sur la trono. 8 Kaj kiam li prenis la
libron, la kvar kreitaĵoj kaj la dudek kvar presbiteroj
falis antaŭ la Ŝafido, havantaj ĉiu harpon, kaj orajn
pelvojn plenajn de incenso, kiuj estas la preĝoj de la
sanktuloj. 9 Kaj ili kantis novan kanton, dirante: Vi
estas inda preni la libron kaj malfermi ĝiajn sigelojn;
ĉar vi estis mortigita, kaj vi elaĉetis al Dio per via
sango homojn el ĉiu tribo kaj lingvo kaj popolo kaj
nacio, 10 kaj faris ilin al nia Dio regno kaj pastroj; kaj
ili reĝas sur la tero. 11 Kaj mi rigardis, kaj mi aŭdis
voĉon de multaj anĝeloj, ronde ĉirkaŭ la trono kaj
la kreitaĵoj kaj la presbiteroj; kaj ilia nombro estis
miriadoj da miriadoj kaj miloj da miloj; 12 dirantaj
per granda voĉo: Inda estas la Ŝafido, la mortigita,
ricevi la potencon kaj riĉon kaj saĝecon kaj forton kaj
honoron kaj gloron kaj laŭdon. 13 Kaj ĉiun kreitaĵon,
kiu estis en la ĉielo kaj sur la tero kaj sub la tero kaj
sur la maro, kaj ĉion en ili, mi aŭdis dirantajn: Al la
Sidanto sur la trono, kaj al la Ŝafido, estu la laŭdo
kaj la honoro kaj la gloro kaj la potenco por ĉiam kaj
eterne. (aiōn g165) 14 Kaj la kvar kreitaĵoj diris: Amen.
Kaj la presbiteroj falis kaj adorkliniĝis.

**6** Kaj mi rigardis, kiam la Ŝafido malfermis unu el
la sep sigeloj, kaj mi aŭdis unu el la kvar kreitaĵoj
dirantan kvazaŭ per voĉo de tondro: Venu. 2 Kaj mi
rigardis, kaj jen blanka ĉevalo, kaj la sidanta sur ĝi
havis pafarkon; kaj estis donita al li krono; kaj li eliris
venkanta, kaj por venki. 3 Kaj kiam li malfermis la
duan sigelon, mi aŭdis la duan kreitaĵon dirantan:
Venu. 4 Kaj eliris alia ĉevalo, flamkolora; kaj al la
sidanta sur ĝi estis donite forpreni pacon de la tero,
kaj ke oni mortigu unu la alian; kaj al li estis donita
granda glavo. 5 Kaj kiam li malfermis la trian sigelon,
mi aŭdis la trian kreitaĵon dirantan: Venu. Kaj mi
rigardis, kaj jen nigra ĉevalo; kaj la sidanta sur ĝi
havis en la mano pesilon. 6 Kaj mi aŭdis kvazaŭ voĉon,
meze de la kvar kreitaĵoj, dirantan: Mezuro da tritiko
por denaro, kaj tri mezuroj da hordeo por denaro;
kaj la oleon kaj la vinon ne difektu. 7 Kaj kiam li
malfermis la kvaran sigelon, mi aŭdis la voĉon de la
kvara kreitaĵo dirantan: Venu. 8 Kaj mi rigardis, kaj
jen pala ĉevalo; kaj la nomo de la sidanta sur ĝi estis
Morto; kaj Hades sekvis kun li. Kaj estis donita al ili
aŭtoritato super kvarono de la tero, por mortigi per
glavo kaj per malsato kaj per morto kaj per la sovaĝaj
bestoj de la tero. (Hadēs g86) 9 Kaj kiam li malfermis la
kvinan sigelon, mi vidis sub la altaro la animojn de la

mortigitaj pro la vorto de Dio kaj pro la atesto, kiun
ili havadis; 10 kaj ili kriis per granda voĉo, dirante: Ĝis
kiam, ho Estro, la sankta kaj vera, Vi ne juĝas kaj ne
venĝas nian sangon al la loĝantoj sur la tero? 11 Kaj
estis donita al ĉiu el ili blanka robo; kaj estis dirite al
ili, ke ili atendu ankoraŭ kelkan tempon, ĝis ankaŭ iliaj
kunservistoj kaj iliaj fratoj, mortigotaj kiel ili mem,
plensumiĝos. 12 Kaj mi rigardis, kiam li malfermis
la sesan sigelon, kaj fariĝis granda tertremo; kaj la
suno fariĝis nigra kiel sakaĵo el haroj, kaj la tuta luno
fariĝis kiel sango; 13 kaj la steloj de la ĉielo falis sur
la teron, kiel figarbo, skuate de forta vento, ĵetas
siajn nematurajn figojn. 14 Kaj la ĉielo formoviĝis,
kvazaŭ kunvolvata libro; kaj ĉiu monto kaj ĉiu insulo
formoviĝis de sia loko. 15 Kaj la reĝoj de la tero kaj la
granduloj kaj la milestroj kaj la riĉuloj kaj la fortuloj
kaj ĉiu sklavo kaj ĉiu liberulo sin kaŝis en la kavernoj
kaj inter la rokoj de la montoj; 16 kaj ili diris al la
montoj kaj al la rokoj: Falu sur nin, kaj nin kaŝu for
de la vizaĝo de la Sidanto sur la trono, kaj for de la
kolero de la Ŝafido; 17 ĉar venis la granda tago de ilia
kolero; kaj kiu povas stari?

**7** Post tio mi vidis kvar anĝelojn starantajn sur la
kvar anguloj de la tero, retenantajn la kvar ventojn
de la tero, por ke ne blovu vento sur la teron, nek
sur la maron, nek sur ian arbon. 2 Kaj mi vidis alian
anĝelon suprenirantan de la sunleviĝo, havantan
sigelilon de la vivanta Dio; kaj li ekkriis per granda
voĉo al la kvar anĝeloj, al kiuj estis donite difekti la
teron kaj la maron, 3 dirante: Ne difektu la teron,
nek la maron, nek la arbojn, antaŭ ol ni sigelos sur
iliaj fruntoj la servistojn de nia Dio. 4 Kaj mi aŭdis
la nombron de la sigelitoj, cent kvardek kvar miloj,
sigelitaj el ĉiuj triboj de la Izraelidoj: 5 El la tribo
de Jehuda estis sigelitaj dek du miloj; El la tribo de
Ruben, dek du miloj; El la tribo de Gad, dek du miloj; 6
El la tribo de Aŝer, dek du miloj; El la tribo de Naftali,
dek du miloj; El la tribo de Manase, dek du miloj; 7 El
la tribo de Simeon, dek du miloj; El la tribo de Levi,
dek du miloj; El la tribo de Isaĥar, dek du miloj; 8 El la
tribo de Zebulun, dek du miloj; El la tribo de Jozef,
dek du miloj; El la tribo de Benjamen estis sigelitaj
dek du miloj. 9 Post tio mi rigardis, kaj jen granda
homamaso, kiun neniu povis kalkuli, el ĉiu nacio,
kaj el ĉiuj triboj kaj popoloj kaj lingvoj, starantaj
antaŭ la trono kaj antaŭ la Ŝafido, vestitaj per blankaj
roboj, kaj kun palmoj en iliaj manoj; 10 kaj ili kriis per
granda voĉo, dirante: Savo al nia Dio, la sidanta sur la
trono, kaj al la Ŝafido. 11 Kaj ĉiuj anĝeloj staris ĉirkaŭ
la trono kaj la presbiteroj kaj la kvar kreitaĵoj; kaj ili
falis sur sian vizaĝon antaŭ la trono, kaj adorkliniĝis
al Dio, 12 dirante: Amen; La laŭdo kaj la gloro kaj la
saĝeco kaj la danko kaj la honoro kaj la potenco kaj la
forto estu al nia Dio por ĉiam kaj eterne. Amen. (aiōn
g165) 13 Kaj respondis unu el la presbiteroj, dirante
al mi: Kiuj estas ĉi tiuj per blankaj roboj vestitaj, kaj
de kie ili venis? 14 Kaj mi diris al li: Mia sinjoro, vi
scias. Kaj li diris al mi: Ĉi tiuj estas la venantoj el la
granda afliktado, kaj ili lavis siajn robojn, kaj blankigis
ilin en la sango de la Ŝafido. 15 Tial ili estas antaŭ
la trono de Dio; kaj ili servas al Li tage kaj nokte en
Lia templo; kaj la Sidanto sur la trono etendos super
ili Sian tabernaklon. 16 Ili ne plu malsatos, nek plu
soifos; ne frapos ilin la suno nek ia varmego; 17 ĉar
la Ŝafido, kiu estas meze de la trono, paŝtos ilin kaj
kondukos ilin al akvofontoj de vivo; kaj Dio forviŝos
de iliaj okuloj ĉiun larmon.

**8** Kaj kiam li malfermis la sepan sigelon, fariĝis
silento en la ĉielo por ĉirkaŭ duono de horo. 2 Kaj
mi vidis la sep anĝelojn, kiuj staras antaŭ Dio; kaj
estis donitaj al ili sep trumpetoj. 3 Kaj alia anĝelo
venis, kaj staris apud la altaro, havante incensilon
oran; kaj estis donita al li multe da incenso, por ke
li aldonu ĝin al la preĝoj de ĉiuj sanktuloj sur la
altaro ora, kiu estis antaŭ la trono. 4 Kaj la fumo
de la incenso, kun la preĝoj de la sanktuloj, leviĝis
antaŭ Dio el la mano de la anĝelo. 5 Kaj la anĝelo
prenis la incensilon, kaj li plenigis ĝin per la fajro de
la altaro, kaj ĵetis ĝin sur la teron; kaj fariĝis tondroj
kaj voĉoj kaj fulmoj kaj tertremo. 6 Kaj la sep anĝeloj,
havantaj la sep trumpetojn, sin pretigis, por trumpeti.
7 Kaj la unua trumpetis, kaj fariĝis hajlo kaj fajro,
miksitaj kun sango, kaj ili estis ĵetitaj sur la teron;
kaj triono de la tero forbrulis, kaj triono de la arboj
forbrulis, kaj la tuta verda herbo forbrulis. 8 Kaj la
dua anĝelo trumpetis, kaj kvazaŭ granda monto, per
fajro brulanta, estis ĵetita en la maron; kaj triono
de la maro fariĝis sango; 9 kaj mortis triono de la
kreitaĵoj en la maro, kiuj havis vivon; kaj triono de
la ŝipoj pereis. 10 Kaj la tria anĝelo trumpetis, kaj
falis el la ĉielo granda stelo, brulanta kiel torĉo, kaj
ĝi falis sur trionon de la riveroj kaj sur la fontojn

de la akvoj; 11 kaj la nomo de la stelo estas Absinto;
kaj triono de la akvoj fariĝis absintaĵo; kaj multe da
homoj mortis de la akvoj, ĉar ili maldolĉiĝis. 12 Kaj la
kvara anĝelo trumpetis, kaj estis frapita triono de
la suno kaj triono de la luno kaj triono de la steloj,
por ke mallumiĝu triono de ili, kaj ke ne lumu dum
triono de la tago, kaj por la nokto tiel same. 13 Kaj
mi rigardis, kaj mi aŭdis unu aglon, flugantan en
meza ĉielo, dirantan per granda voĉo: Ve! ve! ve al la
loĝantoj sur la tero, pro la ceteraj voĉoj trumpetaj de
la tri anĝeloj ankoraŭ trumpetontaj!

**9** Kaj la kvina anĝelo trumpetis, kaj mi vidis stelon
el la ĉielo falintan sur la teron; kaj al li estis
donita la ŝlosilo de la puto de la abismo. **(Abyssos
g12)** 2 Kaj li malfermis la puton de la abismo; kaj el
la puto leviĝadis fumo, kiel fumo el granda forno;
kaj mallumiĝis la suno kaj la aero pro la fumo de la
puto. **(Abyssos g12)** 3 Kaj el la fumo eliris akridoj sur la
teron; kaj al ili estis donita povo, kiel havas povon la
skorpioj de la tero. 4 Kaj estis ordonite al ili, ke ili ne
difektu la herbon de la tero, nek ian verdaĵon, nek
ian arbon, sed nur tiujn homojn, kiuj ne havas sur la
frunto la sigelon de Dio. 5 Kaj al ili estis komisiite, ke
ili ne mortigu ilin, sed ke ili estu turmentataj kvin
monatojn; kaj ilia turmento estis kiel turmento de
skorpio, kiam ĝi pikvundas homon. 6 Kaj en tiuj tagoj
la homoj serĉos morton, kaj ĝin tute ne trovos; kaj ili
deziregos morti, kaj morto forflugos de ili. 7 Kaj la
formoj de la akridoj similis ĉevalojn, pretigitajn por
milito; kaj sur iliaj kapoj estis kvazaŭ kronoj similaj
al oro, kaj iliaj vizaĝoj estis kiel vizaĝoj de homoj.
8 Kaj ili havis harojn kiel haroj de virinoj, kaj iliaj
dentoj estis kiel de leonoj. 9 Kaj ili havis kirasojn,
kiel kirasoj el fero; kaj la sono de iliaj flugiloj estis
kiel la sono de ĉaroj, de multe da ĉevaloj kurantaj
en militon. 10 Kaj ili havis vostojn similajn al vostoj
de skorpioj, kaj pikilojn; kaj en iliaj vostoj estas ilia
kapablo difekti la homojn kvin monatojn. 11 Ili havis
super si reĝon, la anĝelon de la abismo; lia nomo estas
en la Hebrea lingvo Abadon, kaj en la Greka lingvo
li havas la nomon Apolion. **(Abyssos g12)** 12 La unua
Veo jam pasis; jen post tio venas ankoraŭ du Veoj.
13 Kaj la sesa anĝelo trumpetis, kaj mi aŭdis voĉon
el la kornoj de la ora altaro, kiu staras antaŭ Dio, 14
dirantan al la sesa anĝelo, kiu havis la trumpeton:
Malligu la kvar anĝelojn, ligitajn apud la granda rivero
Eŭfrato. 15 Kaj malligiĝis la kvar anĝeloj, pretigitaj
por la horo kaj tago kaj monato kaj jaro, por ke ili
mortigu trionon de la homoj. 16 Kaj la nombro de la
armeoj de la kavalerio estis ducent milionoj; mi aŭdis
ilian nombron. 17 Kaj tiel mi vidis la ĉevalojn en la
vizio, kaj la sidantajn sur ili, havantajn kirasojn kiel el
fajro kaj el jacinto kaj el sulfuro; kaj la kapoj de la
ĉevaloj estis kiel kapoj de leonoj, kaj el iliaj buŝoj eliris
fajro kaj fumo kaj sulfuro. 18 Per tiuj tri plagoj triono
de la homoj estis mortigita, per la fajro kaj la fumo
kaj la sulfuro elirantaj el iliaj buŝoj. 19 Ĉar la kapablo
de la ĉevaloj estas en iliaj buŝoj kaj en iliaj vostoj; ĉar
iliaj vostoj similas serpentojn kaj havas kapojn; kaj
per ĉi tiuj ili vundas. 20 Kaj la ceteraj homoj, kiuj ne
estis mortigitaj per tiuj plagoj, ne pentis pri la faroj
de siaj manoj, por ne adorkliniĝi al demonoj, kaj al la
idoloj oraj kaj arĝentaj kaj kupraj kaj ŝtonaj kaj lignaj,
kiuj povas nek vidi, nek aŭdi, nek marŝi; 21 kaj ili ne
pentis pri siaj mortigoj, nek pri siaj sorĉoj, nek pri sia
malĉastado, nek pri siaj ŝteloj.

**10** Kaj mi vidis alian fortan anĝelon,
malsuprenirantan el la ĉielo, vestitan per nubo;
kaj la ĉielarko estis super lia kapo, kaj lia vizaĝo estis
kiel la suno, kaj liaj piedoj kiel kolonoj el fajro; 2 kaj li
havis en la mano libreton malfermitan; kaj li metis la
dekstran piedon sur la maron, kaj la maldekstran
sur la teron; 3 kaj li ekkriis per granda voĉo, kiel
leono blekas; kaj kiam li kriis, la sep tondroj parolis
per siaj voĉoj. 4 Kaj kiam la sep tondroj parolis, mi
volis skribi; kaj mi aŭdis voĉon el la ĉielo, dirantan:
Sigelu tion, kion parolis la sep tondroj, kaj ĝin ne
skribu. 5 Kaj la anĝelo, kiun mi vidis staranta sur
la maro kaj sur la tero, levis sian dekstran manon
al la ĉielo, 6 kaj ĵuris per la Vivanto por ĉiam kaj
eterne, kiu kreis la ĉielon kaj tion, kio estas en ĝi, kaj
la teron kaj tion, kio estas en ĝi, kaj la maron kaj tion,
kio estas en ĝi, ke tempo ne plu ekzistos; **(aiōn g165)** 7
sed en la tagoj de la voĉo de la sepa anĝelo, kiam li
tuj trumpetos, tiam finiĝos la mistero de Dio, kiel Li
evangeliis al Siaj servistoj, la profetoj. 8 Kaj la voĉo,
kiun mi aŭdis el la ĉielo, parolis al mi denove, dirante:
Iru, prenu la libreton malfermitan en la mano de la
anĝelo, staranta sur la maro kaj sur la tero. 9 Kaj mi
iris al la anĝelo, kaj diris al li: Donu al mi la libreton.
Kaj li diris al mi: Prenu ĝin, kaj formanĝu ĝin; kaj
ĝi maldolĉigos al vi la ventron, sed en via buŝo ĝi

estos dolĉa kiel mielo. 10 Kaj mi prenis la libreton el
la mano de la anĝelo, kaj formanĝis ĝin; kaj en mia
buŝo ĝi estis dolĉa kiel mielo, kaj kiam mi ĝin manĝis,
mia ventro maldolĉiĝis. 11 Kaj ili diris al mi: Vi devas
denove profeti ĉe multaj popoloj kaj nacioj kaj lingvoj
kaj reĝoj.

11 Kaj estis donita al mi kano, simila al bastono;
kaj iu diris: Leviĝu, kaj mezuru la templon de
Dio, kaj la altaron, kaj la adorantojn en ĝi. 2 Kaj la
korton ekster la templo preterlasu, kaj ne mezuru
ĝin, ĉar ĝi estas donita al la nacioj; kaj la sanktan
urbon ili piedpremos kvardek du monatojn. 3 Kaj mi
donos komision al miaj du atestantoj, kaj ili profetos
mil ducent sesdek tagojn, vestite per sakaĵo. 4 Ili
estas la du olivarboj kaj la du lampingoj, starantaj
antaŭ la Sinjoro de la tero. 5 Kaj se iu volas difekti
ilin, fajro elvenas el ilia buŝo kaj formanĝas iliajn
malamikojn; kaj se iu volas difekti ilin, tiamaniere
li devas esti mortigita. 6 Ili havas la povon fermi la
ĉielon, por ke ne pluvu dum la tagoj de ilia profetado;
kaj ili havas povon super la akvoj, por ŝanĝi ilin en
sangon, kaj frapi la teron per ĉia plago ĉiufoje, kiam
ili volos. 7 Kaj kiam ili finos sian ateston, la besto, kiu
suprenvenas el la abismo, faros militon kontraŭ ili kaj
venkos ilin kaj mortigos ilin. (Abyssos g12) 8 Kaj iliaj
kadavroj kuŝas sur la strato de la granda urbo, kiu
nomiĝas laŭspirite Sodom kaj Egiptujo, kie ankaŭ ilia
Sinjoro estis krucumita. 9 Kaj el la popoloj kaj triboj
kaj lingvoj kaj nacioj oni rigardas iliajn kadavrojn dum
tri tagoj kaj duono, kaj ne lasas meti iliajn kadavrojn
en tombon. 10 Kaj la loĝantoj sur la tero ĝojas pri
ili, kaj gajiĝas; kaj ili sendos donacojn unu al la alia;
ĉar tiuj du profetoj turmentadis la loĝantojn sur la
tero. 11 Kaj post la tri tagoj kaj duono la spirito de
vivo el Dio eniris en ilin, kaj ili stariĝis sur siaj piedoj;
kaj granda timo falis sur tiujn, kiuj ilin rigardis. 12
Kaj ili aŭdis grandan voĉon el la ĉielo, dirantan al
ili: Suprenvenu ĉi tien. Kaj ili supreniris en la ĉielon
en la nubo; kaj iliaj malamikoj rigardis ilin. 13 Kaj en
tiu horo fariĝis granda tertremo, kaj dekono de la
urbo falis; kaj en la tertremo mortis sep mil homoj;
kaj la ceteraj pleniĝis de timo, kaj donis laŭdon al la
Dio de la ĉielo. 14 La dua Veo jam pasis; jen la tria
Veo rapide venas. 15 Kaj la sepa anĝelo trumpetis;
kaj fariĝis grandaj voĉoj en la ĉielo, dirante: La regno
de la mondo fariĝis regno de nia Sinjoro kaj de Lia
Kristo; kaj li reĝos por ĉiam kaj eterne. (aiōn g165) 16
Kaj la dudek kvar presbiteroj, kiuj antaŭ Dio sidas
sur siaj tronoj, falis sur la vizaĝon kaj adorkliniĝis al
Dio, 17 dirante: Ni dankas Vin, ho Dio, la Sinjoro, la
Plejpotenca, kiu estas kaj estis; ĉar Vi alprenis Vian
grandan potencon kaj reĝis. 18 Kaj la nacioj furiozis,
kaj venis Via kolero, kaj la tempo de la mortintoj,
por esti juĝataj, kaj la tempo doni la rekompencon al
Viaj servistoj, la profetoj, kaj al la sanktuloj, kaj al la
timantoj de Via nomo, malgrandaj kaj grandaj, kaj
pereigi la detruantojn de la tero. 19 Kaj malfermiĝis la
enĉiela templo de Dio, kaj vidiĝis en Lia templo la
kesto de Lia interligo; kaj fariĝis fulmoj kaj voĉoj kaj
tondroj kaj tertremo kaj granda hajlo.

12 Kaj granda signo vidiĝis en la ĉielo: virino vestita
per la suno, kaj la luno sub ŝiaj piedoj, kaj sur ŝia
kapo krono el dek du steloj; 2 kaj estante graveda,
ŝi ekkriis, naskodolorigate kaj suferante por naski.
3 Kaj vidiĝis alia signo en la ĉielo; kaj jen granda
ruĝa drako, havanta sep kapojn kaj dek kornojn, kaj
sur siaj kapoj sep diademojn. 4 Kaj ĝia vosto trenis
trionon de la steloj de la ĉielo, kaj ĵetis ilin sur la
teron; kaj la drako staris antaŭ la virino naskonta, por
ke, kiam ŝi estos naskinta, ĝi formanĝu ŝian infanon.
5 Kaj ŝi naskis filon, viran infanon, kiu regos ĉiujn
naciojn per fera sceptro; kaj ŝia infano estis forkaptita
supren al Dio kaj al Lia trono. 6 Kaj la virino forkuris
en la dezerton, kie ŝi havis lokon pretigitan de Dio,
por ke tie oni nutru ŝin mil ducent sesdek tagojn. 7
Kaj fariĝis milito en la ĉielo: Miĥael kaj liaj anĝeloj
ekmilitis kontraŭ la drako; kaj militis la drako kaj ĝiaj
anĝeloj; 8 kaj ne prosperis al ili, kaj ne plu troviĝis
ilia loko en la ĉielo. 9 Kaj ĵetiĝis malsupren la granda
drako, la antikva serpento, nomata Diablo kaj Satano,
la trompanto de la tuta mondo; ĝi ĵetiĝis sur la teron,
kaj ĝiaj anĝeloj ĵetiĝis kun ĝi. 10 Kaj mi aŭdis grandan
voĉon en la ĉielo, dirantan: Nun fariĝis la savo kaj la
potenco kaj la reĝeco de nia Dio, kaj la aŭtoritato de
Lia Kristo; ĉar ĵetiĝis malsupren la akuzanto de niaj
fratoj, kiu tage kaj nokte akuzas ilin antaŭ nia Dio. 11
Kaj ili venkis ĝin pro la sango de la Ŝafido, kaj pro la
vorto de sia atesto; kaj ili ne amis sian vivon ĝis morto
mem. 12 Pro tio ĝoju, ho ĉieloj, kaj vi, kiuj en ili loĝas.
Ve al la tero kaj al la maro! ĉar la diablo malsupreniris
en vin, havante grandan koleron, sciante, ke li havas
nur mallongan tempon. 13 Kaj kiam la drako vidis, ke

ĝi estas ĵetita sur la teron, ĝi persekutis la virinon, kiu
naskis la viran infanon. 14 Kaj al la virino estis donitaj
la du flugiloj de la granda aglo, por ke ŝi flugu en la
dezerton, sur sian lokon, kie ŝi estas nutrata tempon
kaj tempojn kaj duontempon, for de la vizaĝo de la
serpento. 15 Kaj la serpento elĵetis el sia buŝo, post
la virinon, akvon kvazaŭ riveron, por ke ĝi igu ŝin
forportiĝi de la fluo. 16 Kaj la tero helpis la virinon, kaj
la tero malfermis sian buŝon, kaj englutis la riveron,
kiun la drako elĵetis el sia buŝo. 17 Kaj la drako furiozis
kontraŭ la virino, kaj foriris, por fari militon kontraŭ
la restintojn de ŝia idaro, kiuj observas la ordonojn de
Dio kaj havas la ateston de Jesuo;

13 kaj ĝi staris sur la sablo de la maro. Kaj mi
vidis beston suprenirantan el la maro, havantan
dek kornojn kaj sep kapojn, kaj sur siaj kornoj dek
diademojn, kaj sur siaj kapoj nomojn de blasfemo. 2
Kaj la besto, kiun mi vidis, estis simila al leopardo, kaj
ĝiaj piedoj estis kiel de urso, kaj ĝia buŝo kiel buŝo de
leono; kaj la drako donis al ĝi sian potencon kaj sian
tronon kaj grandan aŭtoritaton. 3 Kaj mi vidis unu el
ĝiaj kapoj kvazaŭ morte vunditan; kaj la morta vundo
saniĝis; kaj la tuta tero miris post la besto; 4 kaj ili
adorkliniĝis al la drako, ĉar ĝi donis sian aŭtoritaton
al la besto; kaj ili adorkliniĝis al la besto, dirante: Kiu
estas simila al la besto? kaj kiu povas militi kontraŭ
ĝi? 5 kaj estis donita al ĝi buŝo, parolanta grandaĵojn
kaj blasfemaĵojn; kaj estis donita al ĝi aŭtoritato agadi
dum kvardek du monatoj. 6 Kaj ĝi malfermis la buŝon
por blasfemoj kontraŭ Dio, por blasfemi Lian nomon
kaj Lian tabernaklon kaj la loĝantojn de la ĉielo. 7 Kaj
estis donite al ĝi fari militon kontraŭ la sanktuloj, kaj
venki ilin; kaj estis donita al ĝi aŭtoritato sur ĉiu tribo
kaj popolo kaj lingvo kaj nacio. 8 Kaj adorkliniĝos al
ĝi ĉiuj loĝantoj de la tero, kies nomo ne estas skribita
en la libro de vivo, libro de la Ŝafido oferita jam de la
fondo de la mondo. 9 Se iu havas orelon, tiu aŭskultu.
10 Se iu malliberigas, en malliberecon li iras; se iu per
la glavo mortigos, li devas per la glavo esti mortigita.
Ĉi tie estas la pacienco kaj la fido de la sanktuloj. 11
Kaj mi vidis alian beston suprenirantan el la tero; kaj
ĝi havis du kornojn, simile al ŝafido, kaj ĝi parolis
kiel drako. 12 Kaj ĝi ekzercas la tutan aŭtoritaton de
la unua besto antaŭ ĝi. Kaj ĝi devigas la teron kaj
la loĝantojn sur ĝi adorkliniĝi al la unua besto, kies
morta vundo saniĝis. 13 Kaj ĝi faras grandajn signojn,
devigante eĉ fajron malsupreniri el la ĉielo sur la
teron antaŭ la homoj. 14 Kaj ĝi trompas la loĝantojn
de la tero per la signoj, kiujn estis donite al ĝi fari
antaŭ la besto; dirante al la loĝantoj sur la tero, ke ili
faru bildon al la besto, kiu havis la glavovundon kaj
vivis. 15 Kaj estis donite, ke ĝi donu spiron al la bildo
de la besto, por ke eĉ parolu la bildo de la besto, kaj
faru, ke ĉiuj, kiuj ne volas adorkliniĝi al la bildo de
la besto, estu mortigitaj. 16 Kaj ĝi devigas ĉiujn, la
malgrandajn kaj la grandajn, la riĉajn kaj la malriĉajn,
la liberajn kaj la sklavajn, ricevi markon sur la dekstra
mano aŭ sur la frunto; 17 por ke neniu povu aĉeti aŭ
vendi, krom tiuj, kiuj havas la markon, la nomon de
la besto, aŭ la numeron de ĝia nomo. 18 Ĉi tie estas
saĝeco. Kiu havas prudenton, tiu kalkulu la numeron
de la besto; ĉar ĝi estas la numero de homo; kaj ĝia
numero estas sescent sesdek ses.

14 Kaj mi rigardis, kaj jen la Ŝafido staranta sur
la monto Cion, kaj kun li cent kvardek kvar
miloj, havantaj lian nomon, kaj la nomon de lia Patro,
skribitajn sur ilia frunto. 2 Kaj mi aŭdis voĉon el
la ĉielo, kiel voĉon de multaj akvoj, kaj kiel voĉon
de granda tondro; kaj la voĉo, kiun mi aŭdis, estis
kiel de harpistoj, harpantaj per siaj harpoj; 3 kaj ili
kantas kvazaŭ novan kanton antaŭ la trono kaj antaŭ
la kvar kreitaĵoj kaj la presbiteroj; kaj neniu povis
lerni la kanton krom la cent kvardek kvar miloj, la
elaĉetitoj el la tero. 4 Ili estas tiuj, kiuj ne malpuriĝis
kun virinoj; ĉar ili estas virguloj. Ili estas la sekvantoj
de la Ŝafido, kien ajn li iras. Ili estas elaĉetitaj el inter
la homoj, la unuaaĵo al Dio kaj al la Ŝafido. 5 Kaj en ilia
buŝo ne troviĝis mensogo; ili estas senkulpaj. 6 Kaj mi
vidis alian anĝelon, flugantan en meza ĉielo, havantan
eternan evangelion, por evangelii la loĝantojn de
la tero kaj ĉiun nacion kaj tribon kaj lingvon kaj
popolon, **(aiōnios g166)** 7 kaj dirantan per granda voĉo:
Timu Dion, kaj donu al Li gloron, ĉar venis la horo de
Lia juĝo; kaj adorkliniĝu al la Kreinto de la ĉielo kaj la
tero kaj la maro kaj la fontoj akvaj. 8 Kaj alia anĝelo,
dua, sekvis, dirante: Falis, falis Babel la granda, kiu
trinkigis ĉiujn naciojn el la vino de la kolero de ŝia
malĉastaĵo. 9 Kaj alia anĝelo, tria, sekvis ilin, dirante
per granda voĉo: Se iu adorkliniĝas al la besto kaj al
ĝia bildo, kaj ricevas markon sur sia frunto aŭ sur sia
mano, 10 tiu ankaŭ trinkos el la vino de la kolero de
Dio, kiu estas pretigita nemiksite en la pokalo de Lia

kolero, kaj li turmentiĝos en fajro kaj sulfuro antaŭ
la sanktaj anĝeloj kaj antaŭ la Ŝafido; 11 kaj la fumo
de ilia turmento leviĝas por ĉiam kaj eterne; kaj ne
havas paŭzon tage kaj nokte tiuj, kiuj adorkliniĝas al
la besto kaj al ĝia bildo, kaj ĉiu, kiu ricevas la markon
de ĝia nomo. (aiōn g165) 12 Ĉi tie estas la pacienco de la
sanktuloj, kiuj observas la ordonojn de Dio kaj la fidon
de Jesuo. 13 Kaj mi aŭdis voĉon el la ĉielo, dirantan:
Skribu: Feliĉaj estas la mortintoj, kiuj de nun mortas
en la Sinjoro; vere, diras la Spirito, por ke ili ripozu
de siaj laboroj; ĉar iliaj faroj sekvas kun ili. 14 Kaj mi
rigardis, kaj jen blanka nubo, kaj sur la nubo sidanto,
simila al la Filo de homo, havanta sur sia kapo oran
kronon, kaj en sia mano akran rikoltilon. 15 Kaj alia
anĝelo eliris el la templo, kriante per granda voĉo
al la sidanta sur la nubo: Sendu vian rikoltilon, kaj
rikoltu; ĉar venis la horo por rikolti, ĉar la rikolto
de la tero tromaturiĝis. 16 Kaj la sidanta sur la nubo
ĵetis sian rikoltilon sur la teron; kaj la tero rikoltiĝis.
17 Kaj alia anĝelo eliris el la enĉiela templo, ankaŭ
havante akran rikoltilon. 18 Kaj alia anĝelo eliris el la
altaro, havante aŭtoritaton super la fajro; kaj li kriis
per granda voĉo al la portanto de la akra rikoltilo,
dirante: Sendu vian akran rikoltilon, kaj detranĉu
la vinberarojn de la vinberarbo de la tero; ĉar tute
maturiĝis ĝiaj vinberoj. 19 Kaj la anĝelo ĵetis sian
rikoltilon en la teron kaj detranĉis la vinberarbon de
la tero kaj ĵetis ĝin en la grandan vinpremilon de la
kolero de Dio. 20 Kaj la vinpremilo estis tretita ekster
la urbo, kaj eliris sango el la vinpremilo, ĝis la bridoj
de la ĉevaloj, en la spaco de mil sescent stadioj.

15 Kaj mi vidis alian signon en la ĉielo, grandan kaj
mirindan: sep anĝelojn havantajn sep plagojn,
la finajn, ĉar en ili finiĝis la kolero de Dio. 2 Kaj
mi vidis kvazaŭ vitran maron, miksitan kun fajro;
kaj tiujn, kiuj venkis la beston kaj ĝian bildon kaj la
numeron de ĝia nomo; kaj ili staris sur la vitra maro,
havante harpojn de Dio. 3 Kaj ili kantis la kanton de
Moseo, la servanto de Dio, kaj la kanton de la Ŝafido,
dirante: Grandaj kaj mirindaj estas Viaj faroj, ho Dio,
la Sinjoro, la Plejpotenca; justaj kaj veraj estas Viaj
vojoj, ho Reĝo de la nacioj. 4 Kiu ne timos, ho Sinjoro,
kaj ne gloros Vian nomon? ĉar Vi sola estas sankta;
ĉar ĉiuj nacioj venos kaj adorkliniĝos al Vi; ĉar Viaj
justaĵoj elmontriĝis. 5 Kaj post tio mi rigardis, kaj
malfermiĝis la templo de la tabernaklo de la atesto
en la ĉielo; 6 kaj elvenis el la templo la sep anĝeloj,
havante la sep plagojn, vestite per linaĵo pura kaj
luma, kaj zonite ĉirkaŭ la brusto per ora zono. 7 Kaj
unu el la kvar kreitaĵoj donis al la sep anĝeloj sep
orajn pelvojn, plenajn de la kolero de Dio, la vivanta
por ĉiam kaj eterne. (aiōn g165) 8 Kaj la templo pleniĝis
de fumo el la gloro de Dio kaj el Lia potenco; kaj neniu
povis eniri en la templon, ĝis finiĝos la sep plagoj de
la sep anĝeloj.

16 Kaj mi aŭdis grandan voĉon el la templo, dirantan
al la sep anĝeloj: Iru, kaj elverŝu sur la teron
la sep pelvojn de la kolero de Dio. 2 Kaj la unua
foriris, kaj elverŝis sian pelvon sur la teron; kaj fariĝis
malbona kaj dolora ulcero sur la homoj, kiuj havis la
markon de la besto kaj kiuj adorkliniĝis al ĝia bildo. 3
Kaj la dua elverŝis sian pelvon en la maron; kaj fariĝis
sango, kiel de mortinto; kaj mortis ĉiu vivanta estaĵo
en la maro. 4 Kaj la tria elverŝis sian pelvon en la
riverojn kaj en la fontojn de akvoj; kaj fariĝis sango. 5
Kaj mi aŭdis la anĝelon de la akvoj dirantan: Justa
estas Vi, la estanta kaj estinta, la Sanktulo, ĉar Vi
tiele juĝis; 6 ĉar ili elverŝis la sangon de sanktuloj
kaj profetoj, kaj sangon Vi donis al ili trinki; ili tion
meritas. 7 Kaj mi aŭdis la altaron dirantan: Vere, ho
Dio, la Sinjoro, la Plejpotenca, veraj kaj justaj estas
Viaj juĝoj. 8 Kaj la kvara elverŝis sian pelvon sur
la sunon; kaj estis donite al ĝi brulvundi homojn
per fajro. 9 Kaj la homoj brulvundiĝis per granda
varmego, kaj ili blasfemis la nomon de Dio, kiu havas
aŭtoritaton sur tiuj plagoj; kaj ili ne pentis, por doni
al Li gloron. 10 Kaj la kvina elverŝis sian pelvon sur la
tronon de la besto; kaj ĝia regno mallumiĝis; kaj ili
mordis sian langon pro dolorego, 11 kaj ili blasfemis
la Dion de la ĉielo pro siaj doloroj kaj siaj ulceroj; kaj
ili ne pentis pri siaj faroj. 12 Kaj la sesa elverŝis sian
pelvon sur la grandan riveron, la riveron Eŭfrato;
kaj ĝia akvo forsekiĝis, por ke pretiĝu la vojo de la
reĝoj, kiuj venas el la sunleviĝejo. 13 Kaj mi vidis
tri malpurajn spiritojn, kvazaŭ ranojn, elirantaj el
la buŝo de la drako, kaj el la buŝo de la besto, kaj el
la buŝo de la falsa profeto; 14 ĉar ili estas spiritoj de
demonoj, farantaj signojn; ili foriras al la reĝoj de la
tuta mondo, por kolekti ilin por la milito de la granda
tago de Dio, la Plejpotenca. 15 (Jen mi venas kvazaŭ
ŝtelisto. Feliĉa estas tiu, kiu viglas kaj konservas siajn
vestojn, por ke li ne iru nuda, kaj oni ne vidu lian
honton.) 16 Kaj oni kolektis ilin en lokon, nomatan en

la Hebrea lingvo Har-Magedon. 17 Kaj la sepa anĝelo
elverŝis sian pelvon sur la aeron; kaj eliris granda
voĉo el la templo, for de la trono, dirante: Fariĝis!
18 kaj okazis fulmoj kaj voĉoj kaj tondroj; kaj okazis
granda tertremo tia, kia ne okazis de kiam homoj
estiĝis sur la tero, tiela tertremo, tiel granda. 19 Kaj
la granda urbo disiĝis en tri partojn, kaj la urboj de
la nacioj falis; kaj Babel la granda estis memorata
antaŭ Dio, por doni al ĝi la pokalon de la vino de la
furiozeco de Lia kolero. 20 Kaj ĉiu insulo forflugis,
kaj la montoj ne troviĝis. 21 Kaj granda hajlo, peza
kvazaŭ po talanto, falis el la ĉielo sur la homojn; kaj la
homoj blasfemis Dion pro la plago de la hajlo; ĉar ĝia
plago estas treege granda.

**17** Kaj unu el la sep anĝeloj, havantaj la sep pelvojn,
venis kaj parolis kun mi, dirante: Venu ĉi tien,
mi montros al vi la juĝon de la granda malĉastistino,
kiu sidas sur multaj akvoj; 2 kun kiu la reĝoj de la tero
malĉastis, kaj la loĝantoj sur la tero ebriiĝis per la
vino de ŝia malĉasteco. 3 Kaj li forportis min en la
Spirito en dezerton; kaj mi vidis virinon, sidantan sur
skarlata besto, plena de nomoj de blasfemo, havanta
sep kapojn kaj dek kornojn. 4 Kaj la virino estis vestita
per purpuro kaj skarlato, kaj ornamita per oro kaj
altvaloraj ŝtonoj kaj perloj, kaj havis en sia mano oran
pokalon, plenan de abomenindaĵoj kaj la malpuraĵoj
de ŝia malĉasteco, 5 kaj sur sia frunto nomon skribitan:
MISTERO, BABEL LA GRANDA, LA PATRINO DE LA
MALĈASTISTINOJ KAJ DE LA ABOMENINDAĴOJ DE LA
TERO. 6 Kaj mi vidis la virinon ebria de la sango de la
sanktuloj, kaj de la sango de la martiroj de Jesuo. Kaj
vidinte ŝin, mi miris per granda miro. 7 Kaj la anĝelo
diris al mi: Kial vi miris? mi diros al vi la misteron de
la virino, kaj de la besto, kiu portas ŝin kaj kiu havas
la sep kapojn kaj la dek kornojn. 8 La besto, kiun vi
vidis, ekzistis, sed ne ekzistas, kaj venos supren el
la abismo kaj iros en pereon. Kaj la loĝantoj sur la
tero, kies nomoj ne estas skribitaj en la libro de vivo
jam de la fondo de la mondo, miros, kiam ili vidos
la beston, ke ĝi ekzistis kaj ne ekzistas, sed venos.
(Abyssos g12) 9 Ĉi tie estas la signifo, kiu havas saĝecon:
la sep kapoj estas sep montoj, sur kiuj sidas la virino;
10 kaj ili estas sep reĝoj; la kvin jam falis, la unu estas,
la alia ankoraŭ ne venis; kaj kiam li venos, li devos
resti kelkan tempon. 11 Kaj la besto, kiu ekzistis kaj
ne ekzistas, estas ankaŭ oka, kaj estas el la sep; kaj ĝi
iras en pereon. 12 Kaj la dek kornoj, kiujn vi vidis,
estas dek reĝoj, kiuj ankoraŭ ne ricevis regnon; sed
ili ricevas aŭtoritaton kiel reĝoj, kun la besto, por
unu horo. 13 Tiuj havas unu intencon, kaj ili donas
sian potencon kaj aŭtoritaton al la besto. 14 Tiuj
militos kontraŭ la Ŝafido, kaj la Ŝafido venkos ilin,
ĉar li estas Sinjoro de sinjoroj, kaj Reĝo de reĝoj; kaj
venkos tiuj, kiuj estas kun li, vokitaj kaj elektitaj kaj
fidelaj. 15 Kaj li diris al mi: La akvoj, kiujn vi vidis, kie
sidas la malĉastistino, estas popoloj kaj homamasoj
kaj nacioj kaj lingvoj. 16 Kaj la dek kornoj, kiujn vi
vidis, kaj la besto, malamos la malĉastistinon, kaj
faros ŝin izolita kaj nuda, kaj manĝos ŝian karnon,
kaj forbruligos ŝin per fajro. 17 Ĉar Dio enmetis en
ilian koron efektivigi Lian intencon, kaj efektivigi
unu intencon, kaj doni sian regnon al la besto, ĝis la
vortoj de Dio plenumiĝos. 18 Kaj la virino, kiun vi
vidis, estas la granda urbo, kiu havas reĝecon super la
reĝoj de la tero.

**18** Post tio mi vidis alian anĝelon, malsuprenirantan
el la ĉielo, havantan grandan aŭtoritaton; kaj
la tero lumiĝis per lia gloro. 2 Kaj li forte kriis per
granda voĉo, dirante: Falis, falis Babel la granda,
kaj fariĝis loĝejo de demonoj, kaj malliberejo de ĉia
malpura spirito, kaj malliberejo de ĉia malpura kaj
malaminda birdo. 3 Ĉar per la vino de la kolero de
ŝia malĉasteco falis ĉiuj nacioj; kaj la reĝoj de la tero
malĉastis kun ŝi, kaj la komercistoj de la tero riĉiĝis
per la potenco de ŝia lukso. 4 Kaj mi aŭdis alian voĉon
el la ĉielo, dirantan: Elvenu el ŝi, ho Mia popolo, por
ke vi ne partoprenu en ŝiaj pekoj, kaj por ke vi ne
ricevu el ŝiaj plagoj; 5 ĉar ŝiaj pekoj amasiĝis ĝis la
ĉielo, kaj Dio memoris ŝiajn maljustaĵojn. 6 Redonu
al ŝi, ĝuste kiel ŝi donis, kaj duobligu duoble laŭ ŝiaj
faroj; en la pokalo, kiun ŝi miksis, miksu al ŝi duoblon.
7 Kiom ŝi gloris sin kaj voluptis, tiom donu al ŝi da
turmento kaj funebro; ĉar ŝi diras en sia koro: Mi
sidas reĝino, kaj mi ne estas vidvino, kaj mi tute ne
vidos funebron. 8 Tial en unu tago venos ŝiaj plagoj,
morto kaj funebro kaj malsatego; kaj ŝi forbrulos per
fajro; ĉar forta estas Dio, la Sinjoro, kiu ŝin juĝas. 9 Kaj
la reĝoj de la tero, kiuj malĉastis kun ŝi kaj voluptis,
ploros kaj ĝemos pri ŝi, kiam ili rigardos la fumon de
ŝia brulado, 10 starante malproksime pro timo de ŝia
turmento, dirante: Ve! ve, la granda urbo, Babel, la
forta urbo! ĉar en unu horo venis via juĝo. 11 Kaj la

komercistoj de la tero ploras kaj lamentas pri ŝi, ĉar
jam neniu aĉetas ilian komercaĵon; 12 komercaĵon
el oro kaj arĝento kaj altvaloraj ŝtonoj kaj perloj
kaj bisino kaj purpuro kaj silko kaj skarlato, kaj ĉia
parfuma ligno kaj ĉia vazo ebura kaj ĉia vazo el plej
altvalora ligno kaj el kupro kaj fero kaj marmoro, 13
kaj cinamo kaj amomo kaj incenso kaj ŝmiraĵo kaj
olibano kaj vino kaj oleo kaj faruno kaj tritiko kaj
brutoj kaj ŝafoj, kaj el ĉevaloj kaj ĉaroj, kaj korpoj
kaj animoj de homoj. 14 Kaj la fruktaro de la deziroj
de via animo malaperis for de vi, kaj ĉio bongusta
kaj brila pereis for de vi, kaj oni ne plu trovos ilin.
15 La negocintoj de tiuj komercaĵoj, kiuj riĉiĝis per
ŝi, malproksime staros pro la timo de ŝia turmento,
plorante kaj lamentante, 16 kaj dirante: Ve! ve, la
granda urbo, la vestita per bisino kaj purpuro kaj
skarlato, kaj ornamita per oro kaj altvaloraj ŝtonoj kaj
perloj! 17 ĉar en unu horo pereis tiom da riĉeco. Kaj
ĉiu ŝipestro, kaj ĉiu ien ŝipe veturanta, kaj maristoj,
kaj ĉiuj, kiuj sur la maro laboris, staris malproksime,
18 kaj kriis, vidante la fumon de ŝia brulego, dirante:
Kio similas la grandan urbon? 19 Kaj ili ĵetis polvon
sur siajn kapojn, kaj kriis, plorante kaj lamentante, kaj
dirante: Ve! ve, la granda urbo! en kiu riĉiĝis ĉiuj, kiuj
havis siajn ŝipojn sur la maro per ŝia luksego! ĉar en
unu horo ŝi dezertiĝis. 20 Ĝojegu super ŝi, ho ĉielo, kaj
la sanktuloj, kaj la apostoloj, kaj la profetoj; ĉar Dio
decidis pri ŝi laŭ via juĝo. 21 Kaj forta anĝelo prenis
ŝtonon, kvazaŭ grandan muelŝtonon, kaj ĵetis ĝin en
la maron, dirante: Tiel per puŝego deĵetiĝos Babel, la
granda urbo, kaj jam ne plu troviĝos. 22 Kaj voĉo de
harpistoj kaj muzikistoj kaj flutistoj kaj trumpetistoj
jam ne plu aŭdiĝos en vi; kaj ĉia metiisto de ĉia metio
jam ne plu troviĝos en vi; kaj sono de muelŝtono jam
ne plu aŭdiĝos en vi; 23 kaj lumo de lampo jam ne plu
brilos en vi; kaj voĉo de fianĉo kaj fianĉino jam ne plu
aŭdiĝos en vi; ĉar viaj komercistoj estis la granduloj
de la tero; ĉar per via sorĉado ĉiuj nacioj trompiĝis.
24 Kaj en ŝi troviĝis la sango de profetoj kaj sanktuloj,
kaj de ĉiuj mortigitoj sur la tero.

19 Post tio mi aŭdis kvazaŭ grandan voĉon de
granda homamaso en la ĉielo, dirantan: Haleluja!
La savo kaj la gloro kaj la potenco apartenas al nia
Dio; 2 ĉar veraj kaj justaj estas Liaj juĝoj; ĉar Li juĝis la
grandan malĉastistinon, kiu infektis la teron per sia
malĉasteco, kaj Li venĝis la sangon de Siaj servistoj
el ŝia mano. 3 Kaj duan fojon ili diris: Haleluja! Kaj
ŝia fumo leviĝas por ĉiam kaj eterne. (aiōn g165) 4
Kaj la dudek kvar presbiteroj kaj la kvar kreitaĵoj
falis kaj adorkliniĝis al Dio, la sidanta sur la trono,
dirante: Amen, Haleluja! 5 Kaj el la trono eliris voĉo,
dirante: Laŭdu nian Dion, ĉiuj Liaj servistoj, vi, kiuj
timas Lin, la malgrandaj kaj la grandaj. 6 Kaj mi
aŭdis kvazaŭ voĉon de granda homamaso kaj kvazaŭ
voĉon de multaj akvoj kaj kvazaŭ voĉon de fortaj
tondroj, dirantajn: Haleluja! ĉar la Sinjoro, nia Dio, la
Plejpotenca, reĝas. 7 Ni ĝoju kaj triumfu, kaj donu
al Li la gloron; ĉar venis la edziĝo de la Ŝafido, kaj
lia edzino sin pretigis. 8 Kaj estis donite al ŝi, ke
ŝi sin vestu per bisino luma kaj pura; ĉar la bisino
estas la justaĵoj de la sanktuloj. 9 Kaj li diris al mi:
Skribu: Feliĉaj estas la invititaj al la edziĝa festeno de
la Ŝafido. Kaj li diris al mi: Tio estas la veraj vortoj de
Dio. 10 Kaj mi falis antaŭ liaj piedoj, por adorkliniĝi
al li. Kaj li diris al mi: Gardu vin, ke vi tion ne faru;
mi estas kunservisto kun vi kaj kun viaj fratoj, kiuj
konservas la ateston de Jesuo; adorkliniĝu al Dio; ĉar
la atesto de Jesuo estas la spirito de profetado. 11
Kaj mi vidis la ĉielon malfermitan; kaj jen blanka
ĉevalo, kaj la sidanta sur ĝi, nomata Fidela kaj Vera;
en justeco li juĝas kaj militas. 12 Kaj liaj okuloj estas
fajra flamo, kaj sur lia kapo estas multaj diademoj; kaj
li havas nomon skribitan, kiun konas neniu krom li
mem. 13 Kaj li estas vestita per vesto, trempita en
sangon; kaj lia nomo estas: La Vorto de Dio. 14 Kaj
la armeoj en la ĉielo sekvis lin sur blankaj ĉevaloj,
vestite per bisino blanka kaj pura. 15 Kaj el lia buŝo
eliras akra glavo, por ke li per ĝi frapu la naciojn; kaj li
regos ilin per fera sceptro; kaj li tretas la vinpremilon
de la furiozeco de la kolero de Dio, la Plejpotenca.
16 Kaj li havas sur la vesto kaj sur la femuro nomon
skribitan: REĜO DE REĜOJ KAJ SINJORO DE SINJOROJ.
17 Kaj mi vidis unu anĝelon, starantan en la suno; kaj
li ekkriis per granda voĉo, dirante al ĉiuj birdoj, kiuj
flugas en meza ĉielo: Venu, kolektiĝu al la granda
festeno de Dio; 18 por ke vi manĝu karnon de reĝoj
kaj karnon de milestroj kaj karnon de fortuloj kaj
karnon de ĉevaloj kaj de iliaj rajdantoj, kaj karnon de
ĉiuj homoj, liberaj kaj sklavaj, grandaj kaj malgrandaj.
19 Kaj mi vidis la beston, kaj la reĝojn de la tero kaj
iliajn armeojn, kunigitajn, por fari militon kontraŭ la
sidanta sur la ĉevalo kaj kontraŭ lia armeo. 20 Kaj
la besto estis kaptita, kaj kun ĝi la falsa profeto, kiu


faris antaŭ ĝi la signojn, per kiuj li trompis tiujn, kiuj
ricevis la markon de la besto kaj adorkliniĝis al ĝia
bildo; ili ambaŭ estis ĵetitaj vivaj en la lagon fajran,
brulantan per sulfuro; **(Limnē Pyr g3041 g4442)** **21** kaj la
ceteraj estis mortigitaj per la glavo de la sidanta sur
la ĉevalo, la glavo, kiu eliris el lia buŝo; kaj ĉiuj birdoj
satiĝis per ilia karno.

**20** Kaj mi vidis anĝelon malsuprenirantan el la ĉielo,
havantan la ŝlosilon de la abismo kaj grandan
katenon en sia mano. **(Abyssos g12)** **2** Kaj li ekkaptis la
drakon, la antikvan serpenton, kiu estas la Diablo kaj
Satano, kaj enkatenis lin por mil jaroj, **3** kaj ĵetis lin
en la abismon kaj fermis ĝin kaj sigelis ĝin super li,
por ke li ne plu trompu la naciojn, ĝis finiĝos la mil
jaroj; post tio li devos esti malligita por kelka tempo.
**(Abyssos g12)** **4** Kaj mi vidis tronojn, kaj oni sidis sur ili,
kaj juĝo estis donita al ili; kaj mi vidis la animojn de
la senkapigitaj pro la atesto de Jesuo kaj pro la vorto
de Dio, kaj tiujn, kiuj ne adorkliniĝis al la besto, nek
al ĝia bildo, kaj ne ricevis la markon sur sia frunto
kaj sur sia mano; kaj ili vivis, kaj ili reĝis kun Kristo
mil jarojn. **5** La ceteraj mortintoj ne vivis, ĝis finiĝos
la mil jaroj. Tio estas la unua releviĝo. **6** Feliĉa kaj
sankta estas la partoprenanto en la unua releviĝo;
super tiuj la dua morto havas nenian aŭtoritaton; sed
ili estos pastroj de Dio kaj de Kristo, kaj reĝos kun li
mil jarojn. **7** Kaj kiam finiĝos la mil jaroj, Satano estos
ellasita el sia malliberejo, **8** kaj eliros, por trompi la
naciojn en la kvar anguloj de la tero, Gog kaj Magog,
por kolekti ilin por la milito; ilia nombro estas kiel
la sablo de la maro. **9** Kaj ili supreniris laŭlarĝe de
la tero kaj ĉirkaŭis la tendaron de la sanktuloj kaj
la amatan urbon; kaj fajro malsupreniris el la ĉielo,
kaj ekstermis ilin. **10** Kaj la diablo, kiu trompis ilin,
estis ĵetita en la lagon fajran kaj sulfuran, kie troviĝas
la besto kaj la falsa profeto; kaj ili estos turmentataj
tage kaj nokte por ĉiam kaj eterne. **(aiōn g165, Limnē Pyr
g3041 g4442)** **11** Kaj mi vidis grandan blankan tronon, kaj
la Sidanton sur ĝi, antaŭ kies vizaĝo forflugis la tero
kaj la ĉielo; kaj ne troviĝis loko por ili. **12** Kaj mi vidis
la mortintojn, grandajn kaj malgrandajn, starantajn
antaŭ la trono; kaj libroj estis malfermitaj; kaj estis
malfermita alia libro, kiu estas la libro de vivo; kaj la
mortintoj estis juĝataj el la skribitaĵoj en la libroj, laŭ
siaj faroj. **13** Kaj la maro liveris la mortintojn, kiuj estis
en ĝi; kaj la morto kaj Hades liveris la mortintojn,
kiuj estis en ili; kaj ĉiu estis juĝata laŭ siaj faroj. **(Hadēs
g86)** **14** Kaj la morto kaj Hades estis ĵetitaj en la fajran
lagon. Tio estas la dua morto — la fajra lago. **(Hadēs g86,
Limnē Pyr g3041 g4442)** **15** Kaj se iu ne troviĝis skribita en
la libro de vivo, tiu estis ĵetita en la fajran lagon. **(Limnē
Pyr g3041 g4442)**

**21** Kaj mi vidis novan ĉielon kaj novan teron; ĉar la
unua ĉielo kaj la unua tero forpasis; kaj la maro
jam ne ekzistis. **2** Kaj mi vidis la sanktan urbon, novan
Jerusalemon, malsuprenirantan el la ĉielo for de Dio,
pretigitan kiel fianĉino, ornamita por sia edzo. **3** Kaj
mi aŭdis grandan voĉon el la trono, dirantan: Jen la
tabernaklo de Dio estas kun la homoj, kaj Li loĝos kun
ili, kaj ili estos Liaj popoloj, kaj Dio mem estos kun ili
kaj estos ilia Dio; **4** kaj Li forviŝos ĉiun larmon el iliaj
okuloj; kaj la morto jam ne ekzistos; ne plu ekzistos
funebro, nek plorado, nek doloro; la unuaj aferoj
forpasis. **5** Kaj diris la Sidanto sur la trono: Vidu, Mi
faras ĉion nova. Kaj Li diris: Skribu, ĉar tiuj vortoj estas
fidelaj kaj veraj. **6** Kaj Li diris al mi: Ĉio fariĝis. Mi estas
la Alfa kaj la Omega, la komenco kaj la fino. Mi donos
donace al la soifanto el la fonto de la akvo de vivo. **7**
La venkanto heredos ĉion; kaj Mi estos por li Dio, kaj li
estos por Mi filo. **8** Sed por la timemaj kaj nekredemaj
kaj abomenindaj kaj mortigistoj kaj malĉastuloj kaj
sorĉistoj kaj idolanoj kaj ĉiuj mensoguloj, ilia lotaĵo
estos en la lago, brulanta per fajro kaj sulfuro; tio
estas la dua morto. **(Limnē Pyr g3041 g4442)** **9** Kaj venis
unu el la sep anĝeloj, havantaj la sep pelvojn, plenajn
de la sep finaj plagoj; kaj li parolis kun mi, dirante:
Venu ĉi tien, mi montros al vi la fianĉinon, la edzinon
de la Ŝafido. **10** Kaj li forportis min en la Spirito sur
monton, grandan kaj altan, kaj li montris al mi la
sanktan urbon Jerusalem, malsuprenirantan el la ĉielo
for de Dio, **11** havantan la gloron de Dio; ĝia lumo
estis simila al ŝtono plej altvalora, kvazaŭ jaspiso
kristaleca; **12** kun muro granda kaj alta, kun dek du
pordegoj, kaj apud la pordegoj dek du anĝeloj; kaj
nomoj surskribitaj, kiuj estas la nomoj de la dek du
triboj de la Izraelidoj; **13** oriente estis tri pordegoj,
kaj norde tri pordegoj, kaj sude tri pordegoj, kaj
okcidente tri pordegoj. **14** Kaj la muro de la urbo havis
dek du fundamentojn, kaj sur ili dek du nomojn de la
dek du apostoloj de la Ŝafido. **15** Kaj mia kunparolanto
havis mezurilon, oran vergon, por mezuri la urbon kaj
ĝiajn pordegojn kaj ĝian muron. **16** Kaj la urbo staras

kvadrate, kaj ĝia longo estas tiom, kiom la larĝo; kaj li
mezuris la urbon per la vergo, dek du mil stadiojn;
ĝia longo kaj ĝia larĝo kaj ĝia alto estas egalaj. 17
Kaj li mezuris ĝian muron, cent kvardek kvar ulnojn,
laŭ mezuro de homo, tio estas, de anĝelo. 18 Kaj la
strukturo de ĝia muro estis jaspiso; kaj la urbo estis
pura oro, simila al pura vitro. 19 La fundamentoj de la
muro de la urbo estis ornamitaj per altvaloraj ŝtonoj
ĉiuspecaj. La unua fundamento estis jaspiso; la dua,
safiro; la tria, kalcedonio; la kvara, smeraldo; 20 la
kvina, sardonikso; la sesa, sardio; la sepa, krizolito; la
oka, berilo; la naŭa, topazo; la deka, krizopraso; la
dek-unua, jacinto; la dek-dua, ametisto. 21 Kaj la dek
du pordegoj estis dek du perloj, ĉiu el la pordegoj
estis el unu perlo; kaj la strato de la urbo estis pura
oro, kvazaŭ travidebla vitro. 22 Kaj templon en ĝi
mi ne vidis; ĉar Dio, la Sinjoro, la Plejpotenca, kaj la
Ŝafido estas ĝia templo. 23 Kaj la urbo ne bezonas la
sunon, nek la lunon, por brili al ĝi; ĉar la gloro de
Dio lumis al ĝi, kaj ĝia lampo estas la Ŝafido. 24 Kaj la
nacioj promenos per ĝia lumo; kaj la reĝoj de la tero
alportas en ĝin sian gloron. 25 Kaj ĝiaj pordegoj tute
ne estos fermitaj tage (ĉar nokto ne ekzistos tie); 26
kaj ili alportos en ĝin la gloron kaj la honoron de la
nacioj; 27 kaj tute ne eniros en ĝin io malpura, nek
faranto de abomenindaĵo kaj mensogo; sed nur la
skribitaj en la libro de vivo de la Ŝafido.

22 Kaj li montris al mi riveron de akvo de vivo,
helan kiel kristalo, elirantan el la trono de Dio kaj
de la Ŝafido, 2 meze de ĝia strato. Kaj ĉe ĉiu flanko de
la rivero estis arbo de vivo, portanta dek du fruktojn,
liveranta sian frukton ĉiumonate; kaj la folioj de la
arbo estis por la resanigo de la nacioj. 3 Kaj ne plu
ekzistos malbeno; kaj en ĝi estos la trono de Dio kaj
de la Ŝafido; kaj Liaj servistoj Lin adoros; 4 kaj ili vidos
Lian vizaĝon; kaj Lia nomo estos sur ilia frunto. 5 Kaj
nokto ne plu ekzistos; kaj ili ne bezonas lumon de
lampo, nek lumon de suno; ĉar Dio, la Sinjoro, lumos
al ili; kaj ili reĝos por ĉiam kaj eterne. (aiōn g165) 6 Kaj li
diris al mi: Tiuj vortoj estas fidelaj kaj veraj; kaj la
Sinjoro, la Dio de la spiritoj de la profetoj, sendis Sian
anĝelon, por montri al Siaj servistoj tion, kio devas
okazi baldaŭ. 7 Kaj jen mi rapide venos. Feliĉa estas
tiu, kiu observas la vortojn de la profetaĵo de ĉi tiu
libro. 8 Kaj mi, Johano, estis la aŭdanto kaj la vidanto
de ĉi tio. Kaj kiam mi aŭdis kaj vidis, mi falis, por
adorkliniĝi antaŭ la piedoj de la anĝelo, kiu montris
tion al mi. 9 Kaj li diris al mi: Gardu vin, ke vi tion ne
faru; mi estas kunservisto kun vi kaj kun viaj fratoj,
la profetoj, kaj kun la observantoj de la vortoj de ĉi
tiu libro; adorkliniĝu al Dio. 10 Kaj li diris al mi: Ne
sigelu la vortojn de la profetaĵo de ĉi tiu libro; ĉar la
tempo estas proksima. 11 La maljustulo ankoraŭ estu
maljusta; kaj la malpurulo ankoraŭ estu malpura; kaj
la justulo ankoraŭ faru juston; kaj la sanktulo ankoraŭ
sanktiĝu. 12 Jen mi rapide venos; kaj mia rekompenco
estas kun mi, por repagi al ĉiu laŭ lia faro. 13 Mi estas
la Alfa kaj la Omega, la unua kaj la lasta, la komenco
kaj la fino. 14 Feliĉaj estas tiuj, kiuj lavas siajn robojn,
por ke ili havu rajton sur la arbo de vivo, kaj ke ili
eniru tra la pordegoj en la urbon. 15 Ekstere estas
la hundoj kaj la sorĉistoj kaj la malĉastuloj kaj la
mortigistoj kaj la idolanoj, kaj ĉiu, kiu amas kaj faras
mensogon. 16 Mi, Jesuo, sendis mian anĝelon, por
atesti al vi ĉi tion por la eklezioj. Mi estas la markoto
kaj ido de David, la hela, la matena stelo. 17 Kaj la
Spirito kaj la fianĉino diras: Venu. Kaj la aŭdanto diru:
Venu. Kaj la soifanto venu; kiu volas, tiu prenu donace
la akvon de vivo. 18 Mi atestas al ĉiu, kiu aŭdas la
vortojn de la profetaĵo de ĉi tiu libro: Se iu aldonos
al ili, Dio aldonos al li la plagojn, skribitajn en ĉi tiu
libro; 19 kaj se iu forprenos el la vortoj de la libro de
ĉi tiu profetaĵo, skribitaj en ĉi tiu libro, Dio forprenos
lian lotaĵon el la arbo de vivo kaj el la sankta urbo.
20 La atestanto de tio diras: Vere, mi rapide venos.
Amen; venu, Sinjoro Jesuo. 21 La graco de la Sinjoro
Jesuo estu kun ĉiuj sanktuloj. Amen.




*Kaj mi vidis la sanktan urbon, novan Jerusalemon, malsuprenirantan el la ĉielo for de Dio,*
*pretigitan kiel fianĉino, ornamita por sia edzo. Kaj mi aŭdis grandan voĉon el la trono,*
*dirantan: Jen la tabernaklo de Dio estas kun la homoj, kaj Li loĝos kun ili,*
*kaj ili estos Liaj popoloj, kaj Dio mem estos kun ili kaj estos ilia Dio;*
Apokalipso 21:2-3

# Gvidilo por Legantoj

Esperanto at AionianBible.org/Readers-Guide

The Aionian Bible republishes public domain and Creative Common Bible texts that are 100% free to copy and print. The original translation is unaltered and notes are added to help your study. The notes show the location of eleven special Greek and Hebrew Aionian Glossary words to help us better understand God's love for individuals and for all mankind, and the nature of afterlife destinies.

Who has the authority to interpret the Bible and examine the underlying Hebrew and Greek words? That is a good question! We read in 1 John 2:27, *"As for you, the anointing which you received from him remains in you, and you do not need for anyone to teach you. But as his anointing teaches you concerning all things, and is true, and is no lie, and even as it taught you, you remain in him."* Every Christian is qualified to interpret the Bible! Now that does not mean we will all agree. Each of us is still growing in our understanding of the truth. However, it does mean that there is no infallible human or tradition to answer all our questions. Instead the Holy Spirit helps each of us to know the truth and grow closer to God and each other.

The Bible is a library with 66 books in the Protestant Canon. The best way to learn God's word is to read entire books. Read the book of Genesis. Read the book of John. Read the entire Bible library. Topical studies and cross-referencing can be good. However, the safest way to understand context and meaning is to read whole Bible books. Chapter and verse numbers were added for convenience in the 16th century, but unfortunately they can cause the Bible to seem like an encyclopedia. The Aionian Bible is formatted with simple verse numbering, minimal notes, and no cross-referencing in order to encourage the reading of Bible books.

Bible reading must also begin with prayer. Any Christian is qualified to interpret the Bible with God's help. However, this freedom is also a responsibility because without the Holy Spirit we cannot interpret accurately. We read in 1 Corinthians 2:13-14, *"And we speak of these things, not with words taught by human wisdom, but with those taught by the Spirit, comparing spiritual things with spiritual things. Now the natural person does not receive the things of the Spirit of God, for they are foolishness to him, and he cannot understand them, because they are spiritually discerned."* So we cannot understand in our natural self, but we can with God's help through prayer.

The Holy Spirit is the best writer and he uses literary devices such as introductions, conclusions, paragraphs, and metaphors. He also writes various genres including historical narrative, prose, and poetry. So Bible study must spiritually discern and understand literature. Pray, read, observe, interpret, and apply. Finally, *"Do your best to present yourself approved by God, a worker who does not need to be ashamed, properly handling the word of truth."* 2 Timothy 2:15. *"God has granted to us his precious and exceedingly great promises; that through these you may become partakers of the divine nature, having escaped from the corruption that is in the world by lust. Yes, and for this very cause adding on your part all diligence, in your faith supply moral excellence; and in moral excellence, knowledge; and in knowledge, self-control; and in self-control patience; and in patience godliness; and in godliness brotherly affection; and in brotherly affection, love. For if these things are yours and abound, they make you to be not idle nor unfruitful to the knowledge of our Lord Jesus Christ,"* 2 Peter 1:4-8.

# Glosaro

Esperanto at AionianBible.org/Glossary

The Aionian Bible un-translates and instead transliterates eleven special words to help us better understand the extent of God's love for individuals and all mankind, and the nature of afterlife destinies. The original translation is unaltered and a note is added to 64 Old Testament and 200 New Testament verses. Compare the meanings below to the Strong's Concordance and Glossary definitions.

***Abyssos*** g12
*Greek:* proper noun, place
*Usage:* 9 times in 3 books, 6 chapters, and 9 verses
*Meaning:*
Temporary prison for special fallen angels such as Apollyon, the Beast, and Satan.

***aïdios*** g126
*Greek:* adjective
*Usage:* 2 times in Romans 1:20 and Jude 6
*Meaning:*
Lasting, enduring forever, eternal.

***aiōn*** g165
*Greek:* noun
*Usage:* 127 times in 22 books, 75 chapters, and 102 verses
*Meaning:*
A lifetime or time period with a beginning and end, an era, an age, the completion of which is beyond human perception, but known only to God the creator of the aiōns, Hebrews 1:2. Never meaning simple endless or infinite chronological time in Greek usage. Read Dr. Heleen Keizer and Ramelli and Konstan for proofs.

***aiōnios*** g166
*Greek:* adjective
*Usage:* 71 times in 19 books, 44 chapters, and 69 verses
*Meaning:*
From start to finish, pertaining to the age, lifetime, entirety, complete, or even consummate. Never meaning simple endless or infinite chronological time in Koine Greek usage. Read Dr. Heleen Keizer and Ramelli and Konstan for proofs.

***eleēsē*** g1653
*Greek:* verb, aorist tense, active voice, subjunctive mood, 3rd person singular
*Usage:* 1 time in this conjugation, Romans 11:32
*Meaning:*
To have pity on, to show mercy. Typically, the subjunctive mood indicates possiblity, not certainty. However, a subjunctive in a purpose clause is a resulting action as certain as the causal action. The subjunctive in a purpose clause functions as an indicative, not an optative. Thus, the grand conclusion of grace theology in Romans 11:32 must be clarified. God's mercy on all is not a possibility, but a certainty. See ntgreek.org.

***Geenna*** g1067
*Greek:* proper noun, place
*Usage:* 12 times in 4 books, 7 chapters, and 12 verses
*Meaning:*
Valley of Hinnom, Jerusalem's trash dump, a place of ruin, destruction, and judgment in this life, or the next, though not eternal to Jesus' audience.

***Hadēs*** g86
*Greek:* proper noun, place
*Usage:* 11 times in 5 books, 9 chapters, and 11 verses
*Meaning:*
Synonomous with Sheol, though in New Testament usage Hades is the temporal place of punishment for deceased unbelieving mankind, distinct from Paradise for deceased believers.

***Limnē Pyr*** g3041 g4442
*Greek:* proper noun, place
*Usage:* Phrase 5 times in the New Testament
*Meaning:*
Lake of Fire, final punishment for those not named in the Book of Life, prepared for the Devil and his angels, Matthew 25:41.

***Sheol*** h7585
*Hebrew:* proper noun, place
*Usage:* 66 times in 17 books, 50 chapters, and 64 verses
*Meaning:*
The grave or temporal afterlife world of both the righteous and unrighteous, believing and unbelieving, until the general resurrection.

***Tartaroō*** g5020
*Greek:* proper noun, place
*Usage:* 1 time in 2 Peter 2:4
*Meaning:*
Temporary prison for particular fallen angels awaiting final judgment.

# Glosaro +

AionianBible.org/Bibles/Esperanto---Esperanto-Bible/Noted

Glossary references are below. Strong's Hebrew and Greek number notes are added to 64 Old Testament and 200 New Testament verses. Questioned verse translations do not contain Aionian Glossary words and may wrongly imply *eternal* or *Hell*. * The note placement is skipped or adjusted for verses with non-standard numbering.

## *Abyssos*

Luko 8:31
Romanoj 10:7
Apokalipso 9:1
Apokalipso 9:2
Apokalipso 9:11
Apokalipso 11:7
Apokalipso 17:8
Apokalipso 20:1
Apokalipso 20:3

## *aïdios*

Romanoj 1:20
Judas 1:6

## *aiōn*

Mateo 12:32
Mateo 13:22
Mateo 13:39
Mateo 13:40
Mateo 13:49
Mateo 21:19
Mateo 24:3
Mateo 28:20
Marko 3:29
Marko 4:19
Marko 10:30
Marko 11:14
Luko 1:33
Luko 1:55
Luko 1:70
Luko 16:8
Luko 18:30
Luko 20:34
Luko 20:35
Johano 4:14
Johano 6:51
Johano 6:58
Johano 8:35
Johano 8:51
Johano 8:52
Johano 9:32
Johano 10:28
Johano 11:26
Johano 12:34
Johano 13:8
Johano 14:16
Agoj 3:21
Agoj 15:18
Romanoj 1:25
Romanoj 9:5
Romanoj 11:36
Romanoj 12:2
Romanoj 16:27
1 Korintanoj 1:20
1 Korintanoj 2:6
1 Korintanoj 2:7
1 Korintanoj 2:8
1 Korintanoj 3:18
1 Korintanoj 8:13
1 Korintanoj 10:11
2 Korintanoj 4:4
2 Korintanoj 9:9
2 Korintanoj 11:31
Galatoj 1:4
Galatoj 1:5
Efesanoj 1:21
Efesanoj 2:2
Efesanoj 2:7
Efesanoj 3:9
Efesanoj 3:11
Efesanoj 3:21
Efesanoj 6:12
Filipianoj 4:20
Koloseanoj 1:26
1 Timoteo 1:17
1 Timoteo 6:17
2 Timoteo 4:10
2 Timoteo 4:18
Tito 2:12
Hebroj 1:2
Hebroj 1:8
Hebroj 5:6
Hebroj 6:5
Hebroj 6:20
Hebroj 7:17
Hebroj 7:21
Hebroj 7:24
Hebroj 7:28
Hebroj 9:26
Hebroj 11:3
Hebroj 13:8
Hebroj 13:21
1 Petro 1:23
1 Petro 1:25
1 Petro 4:11
1 Petro 5:11
2 Petro 3:18
1 Johano 2:17
2 Johano 1:2
Judas 1:13
Judas 1:25
Apokalipso 1:6
Apokalipso 1:18
Apokalipso 4:9
Apokalipso 4:10
Apokalipso 5:13
Apokalipso 7:12
Apokalipso 10:6
Apokalipso 11:15
Apokalipso 14:11
Apokalipso 15:7
Apokalipso 19:3
Apokalipso 20:10
Apokalipso 22:5

## *aiōnios*

Mateo 18:8
Mateo 19:16
Mateo 19:29
Mateo 25:41
Mateo 25:46
Marko 3:29
Marko 10:17
Marko 10:30
Luko 10:25
Luko 16:9
Luko 18:18
Luko 18:30
Johano 3:15
Johano 3:16
Johano 3:36
Johano 4:14
Johano 4:36
Johano 5:24
Johano 5:39
Johano 6:27
Johano 6:40
Johano 6:47
Johano 6:54
Johano 6:68

Johano 10:28
Johano 12:25
Johano 12:50
Johano 17:2
Johano 17:3
Agoj 13:46
Agoj 13:48
Romanoj 2:7
Romanoj 5:21
Romanoj 6:22
Romanoj 6:23
Romanoj 16:25
Romanoj 16:26
2 Korintanoj 4:17
2 Korintanoj 4:18
2 Korintanoj 5:1
Galatoj 6:8
2 Tesalonikanoj 1:9
2 Tesalonikanoj 2:16
1 Timoteo 1:16
1 Timoteo 6:12
1 Timoteo 6:16
2 Timoteo 1:9
2 Timoteo 2:10
Tito 1:2
Tito 3:7
Filemon 1:15
Hebroj 5:9
Hebroj 6:2
Hebroj 9:12
Hebroj 9:14
Hebroj 9:15
Hebroj 13:20
1 Petro 5:10
2 Petro 1:11
1 Johano 1:2
1 Johano 2:25
1 Johano 3:15
1 Johano 5:11
1 Johano 5:13
1 Johano 5:20
Judas 1:7
Judas 1:21
Apokalipso 14:6

## eleēsē

Romanoj 11:32

## Geenna

Mateo 5:22
Mateo 5:29
Mateo 5:30
Mateo 10:28
Mateo 18:9
Mateo 23:15
Mateo 23:33
Marko 9:43
Marko 9:45
Marko 9:47
Luko 12:5
Jakobo 3:6

## Hadēs

Mateo 11:23
Mateo 16:18
Luko 10:15
Luko 16:23
Agoj 2:27
Agoj 2:31
1 Korintanoj 15:55
Apokalipso 1:18
Apokalipso 6:8
Apokalipso 20:13
Apokalipso 20:14

## Limnē Pyr

Apokalipso 19:20
Apokalipso 20:10
Apokalipso 20:14
Apokalipso 20:15
Apokalipso 21:8

## Sheol


Genezo 37:35
Genezo 42:38
Genezo 44:29
Genezo 44:31
Nombroj 16:30
Nombroj 16:33
Readmono 32:22
1 Samuel 2:6
2 Samuel 22:6
1 Reĝoj 2:6
1 Reĝoj 2:9
Ijob 7:9
Ijob 11:8
Ijob 14:13
Ijob 17:13
Ijob 17:16
Ijob 21:13
Ijob 24:19
Ijob 26:6
Psalmaro 6:5
Psalmaro 9:17
Psalmaro 16:10
Psalmaro 18:5
Psalmaro 30:3
Psalmaro 31:17
Psalmaro 49:14
Psalmaro 49:15
Psalmaro 55:15
Psalmaro 86:13
Psalmaro 88:3
Psalmaro 89:48
Psalmaro 116:3
Psalmaro 139:8
Psalmaro 141:7
Sentencoj 1:12
Sentencoj 5:5
Sentencoj 7:27
Sentencoj 9:18
Sentencoj 15:11
Sentencoj 15:24
Sentencoj 23:14
Sentencoj 27:20
Sentencoj 30:16
Predikanto 9:10
Alt Kanto 8:6
Jesaja 5:14
Jesaja 7:11
Jesaja 14:9
Jesaja 14:11
Jesaja 14:15
Jesaja 28:15
Jesaja 28:18
Jesaja 38:10
Jesaja 38:18
Jesaja 57:9
Jeĥezkel 31:15
Jeĥezkel 31:16
Jeĥezkel 31:17
Jeĥezkel 32:21
Jeĥezkel 32:27
Hoŝea 13:14
Amos 9:2
Jona 2:2
Ĥabakuk 2:5

## Tartaroō


2 Petro 2:4

## Questioned


None yet noted




*Per la fido Abraham, vokite, obeis eliri en lokon, kiun li estis ricevonta kiel heredaĵon; kaj li eliris, ne sciante, kien li iras.* - Hebroj 11:8




*Kiam Faraono forliberigis la popolon, Dio ne irigis ilin per la vojo de la lando Filiŝta, kiu estis proksima; ĉar Dio diris: Eble la popolo pentos, kiam ĝi ekvidos militon, kaj ĝi reiros Egiptujon.* - Eliro 13:17




*Ĉar la Filo de homo venis, ne por esti servata, sed por servi, kaj por doni sian vivon kiel elaĉeton por multaj.* - Marko 10:45




*Paŭlo, servisto de Jesuo Kristo, apostolo vokita, apartigita al la evangelio de Dio,* - Romanoj 1:1

## Creation 4004 B.C.

| | |
|---|---|
| Adam and Eve created | 4004 |
| Tubal-cain forges metal | 3300 |
| Enoch walks with God | 3017 |
| Methuselah dies at age 969 | 2349 |
| God floods the Earth | 2349 |
| Tower of Babel thwarted | 2247 |
| Abraham sojourns to Canaan | 1922 |
| Jacob moves to Egypt | 1706 |
| Moses leads Exodus from Egypt | 1491 |
| Gideon judges Israel | 1245 |
| Ruth embraces the God of Israel | 1168 |
| David installed as King | 1055 |
| King Solomon builds the Temple | 1018 |
| Elijah defeats Baal's prophets | 896 |
| Jonah preaches to Nineveh | 800 |
| Assyrians conquer Israelites | 721 |
| King Josiah reforms Judah | 630 |
| Babylonians capture Judah | 605 |
| Persians conquer Babylonians | 539 |
| Cyrus frees Jews, rebuilds Temple | 537 |
| Nehemiah rebuilds the wall | 454 |
| Malachi prophecies the Messiah | 416 |
| Greeks conquer Persians | 331 |
| Seleucids conquer Greeks | 312 |
| Hebrew Bible translated to Greek | 250 |
| Maccabees defeat Seleucids | 165 |
| Romans subject Judea | 63 |
| Herod the Great rules Judea | 37 |

(The Annals of the World, James Uusher)

## Jesus Christ born 4 B.C.

## New Heavens and Earth

| | |
|---|---|
| | Christ returns for his people |
| 1956 | Jim Elliot martyrd in Ecuador |
| 1830 | John Williams reaches Polynesia |
| 1731 | Zinzendorf leads Moravian mission |
| 1614 | Japanese kill 40,000 Christians |
| 1572 | Jesuits reach Mexico |
| 1517 | Martin Luther leads Reformation |
| 1455 | Gutenberg prints first Bible |
| 1323 | Franciscans reach Sumatra |
| 1276 | Ramon Llull trains missionaries |
| 1100 | Crusades tarnish the church |
| 1054 | The Great Schism |
| 997 | Adalbert marytyrd in Prussia |
| 864 | Bulgarian Prince Boris converts |
| 716 | Boniface reaches Germany |
| 635 | Alopen reaches China |
| 569 | Longinus reaches Alodia / Sudan |
| 432 | Saint Patrick reaches Ireland |
| 397 | Carthage ratifies Bible Canon |
| 341 | Ulfilas reaches Goth / Romania |
| 325 | Niceae proclaims God is Trinity |
| 250 | Denis reaches Paris, France |
| 197 | Tertullian writes Christian literature |
| 70 | Titus destroys the Jewish Temple |
| 61 | Paul imprisoned in Rome, Italy |
| 52 | Thomas reaches Malabar, India |
| 39 | Peter reaches Gentile Cornelius |
| 33 | Holy Spirit empowers the Church |

(Wikipedia, Timeline of Christian missions)

## Resurrected 33 A.D.

<table>
<tr><th colspan="3">What are we?</th><td colspan="2">Genesis 1:26 - 2:3</td><td colspan="5">Mankind is created in God's image, male and female He created us</td></tr>
<tr><th colspan="3">How are we sinful?</th><td colspan="2">Romans 5:12-19</td><td colspan="5">Sin entered the world through Adam and then death through sin</td></tr>
<tr><th colspan="3" rowspan="3">Where are we?</th><th colspan="7">When are we?</th></tr>
<tr><th colspan="2">Innocence</th><th colspan="4">Fallen</th><th>Glory</th></tr>
<tr><th>Eternity<br>Past</th><th>Creation<br>4004 B.C.</th><th>Fall to sin<br>No Law</th><th>Moses' Law<br>1500 B.C.</th><th>Christ<br>33 A.D.</th><th>Church Age<br>Kingdom Age</th><th>New Heavens<br>and Earth</th></tr>
<tr><th rowspan="12">Who are we?</th><td rowspan="3">God</td><td>Father</td><td rowspan="3">John 10:30<br><br>God's perfect fellowship</td><td rowspan="7">Genesis 1:31<br><br>God's perfect fellowship with Adam in The Garden of Eden</td><td colspan="4">1 Timothy 6:16<br>Living in unapproachable light</td><td rowspan="7">Acts 3:21<br>Philippians 2:11<br>Revelation 20:3<br><br>God's perfectly restored fellowship with all Mankind praising Christ as Lord in the Holy City</td></tr>
<tr><td>Son</td><td colspan="2">John 8:58<br>Pre-incarnate</td><td>John 1:14<br>Incarnate</td><td>Luke 23:43<br>Paradise</td></tr>
<tr><td>Holy Spirit</td><td colspan="2">Psalm 139:7<br>Everywhere</td><td colspan="2">John 14:17<br>Living in believers</td></tr>
<tr><td rowspan="3">Mankind</td><td>Living</td><td rowspan="9">Genesis 1:1<br><br>No Creation<br>No people</td><td colspan="4">Ephesians 2:1-5<br>Serving the Savior or Satan on Earth</td></tr>
<tr><td>Deceased believing</td><td colspan="4">Luke 16:22<br>Blessed in Paradise</td></tr>
<tr><td>Deceased unbelieving</td><td colspan="4">Luke 16:23, Revelation 20:5,13<br>Punished in Hades until the final judgment</td></tr>
<tr><td rowspan="6">Angels</td><td>Holy</td><td colspan="4">Hebrews 1:14<br>Serving mankind at God's command</td></tr>
<tr><td>Imprisoned</td><td rowspan="5">Genesis 1:31<br><br>No Fall<br>No unholy Angels</td><td colspan="4">2 Peter 2:4, Jude 6<br>Imprisoned in Tartarus</td><td rowspan="5">Matthew 25:41<br>Revelation 20:10<br><br>Lake of Fire prepared for the Devil and his Angels</td></tr>
<tr><td>Fugitive</td><td colspan="3" rowspan="4">1 Peter 5:8, Revelation 12:10<br><br>Rebelling against Christ<br>Accusing mankind</td><td>Revelation 20:13<br>Thalaasa</td></tr>
<tr><td>First Beast</td><td rowspan="2">Revelation 19:20<br>Lake of Fire</td></tr>
<tr><td>False Prophet</td></tr>
<tr><td>Satan</td><td>Revelation 20:2<br>Abyss</td></tr>
<tr><th colspan="3">Why are we?</th><td colspan="2">Romans 11:25-36, Ephesian 2:7</td><td colspan="5">For God has bound all over to disobedience in order to show mercy to all</td></tr>
</table>

# Destino

Esperanto at AionianBible.org/Destiny

The Aionian Bible shows the location of eleven special Greek and Hebrew Aionian Glossary words to help us better understand God's love for individuals and for all mankind, and the nature of after-life destinies. The underlying Hebrew and Greek words typically translated as *Hell* show us that there are not just two after-life destinies, Heaven or Hell. Instead, there are a number of different locations, each with different purposes, different durations, and different inhabitants. Locations include 1) Old Testament *Sheol* and New Testament *Hadēs*, 2) *Geenna*, 3) *Tartaroō*, 4) *Abyssos*, 5) *Limnē Pyr*, 6) *Paradise*, 7) *The New Heaven*, and 8) *The New Earth*. So there is reason to review our conclusions about the destinies of redeemed mankind and fallen angels.

The key observation is that fallen angels will be present at the final judgment, 2 Peter 2:4 and Jude 6. Traditionally, we understand the separation of the Sheep and the Goats at the final judgment to divide believing from unbelieving mankind, Matthew 25:31-46 and Revelation 20:11-15. However, the presence of fallen angels alternatively suggests that Jesus is separating redeemed mankind from the fallen angels. We do know that Jesus is the helper of mankind and not the helper of the Devil, Hebrews 2. We also know that Jesus has atoned for the sins of all mankind, both believer and unbeliever alike, 1 John 2:1-2. Deceased believers are rewarded in Paradise, Luke 23:43, while unbelievers are punished in Hades as the story of Lazarus makes plain, Luke 16:19-31. Yet less commonly known, the punishment of this selfish man and all unbelievers is before the final judgment, is temporal, and is punctuated when Hades is evacuated, Revelation 20:13. So is there hope beyond Hades for unbelieving mankind? Jesus promised, *"the gates of Hades will not prevail,"* Matthew 16:18. Paul asks, *"Hades where is your victory?"* 1 Corinthians 15:55. John wrote, *"Hades gives up,"* Revelation 20:13.

Jesus comforts us saying, *"Do not be afraid,"* because he holds the keys to *unlock* death and Hades, Revelation 1:18. Yet too often our *Good News* sounds like a warning to *"be afraid"* because Jesus holds the keys to *lock* Hades! Wow, we have it backwards! Hades will be evacuated! And to guarrantee hope, once emptied, Hades is thrown into the Lake of Fire, never needed again, Revelation 20:14.

Finally, we read that anyone whose name is not written in the Book of Life is thrown into the Lake of Fire, the second death, with no exit ever mentioned or promised, Revelation 21:1-8. So are those evacuated from Hades then, *"out of the frying pan, into the fire?"* Certainly, the Lake of Fire is the destiny of the Goats. But, do not be afraid. Instead, read the Bible's explicit mention of the purpose of the Lake of Fire and the identity of the Goats, *"Then he will say also to those on the left hand, 'Depart from me, you cursed, into the consummate fire which is prepared for... the devil and his angels,'"* Matthew 25:41. Bad news for the Devil. Good news for all mankind!

Faith is not a pen to write your own name in the Book of Life. Instead, faith is the glasses to see that the love of Christ for all mankind has already written our names in Heaven. Jesus said, *"You did not choose me, but I chose you," John 15:16*. Though unbelievers will suffer regrettable punishment in Hades, redeemed mankind will never enter the Lake of Fire, prepared for the devil and his angels. And as God promised, all mankind will worship Christ together forever, Philippians 2:9-11.




*Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn, baptante ilin en la nomon de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito;* - Mateo 28:19